Jurij German

Rusio juna

El la rusa tradukis

Jurij Finkel

En tiu morna tempoir'
Rusio juna kaj nesperta
Fortiĝis kun genio Petra,
Strecânte l' fortojn en sopir'.
Pri la scienc' de glor' sindona
Severa ul' instruis ĝin.
Ne unu sangan lecionon
Prezentis sveda paladin'.
Sed post longtempa sorta puno
Leviĝis rus' al firma nuno.
Ja same post martela fal'
Rompiĝas vitr', hardiĝas ŝtal'.

Puŝkin[1]

Firmeco en entreprenoj, senlaceco en plenumo estas la kvalitoj, distingantaj la popolon rusian. Kaj se estus ĉi tie loko por rezonado, tiam montri eblus, ke la entreprenemo kaj nerompebleco en sekvado de la entreprenita estas kaj estis la unua kaŭzo de sukcesoj de rusianoj: ĉar eĉ sub la plej granda pezo de fremda jugo tiuj ĉi kvalitoj en ili ne velkis. Ho popolo, por grandeco kaj gloro naskita, se tiuj kvalitoj en vi estos turnitaj al atingo de ĉio, kio povas krei bonon socian!

Radiŝĉev[2]

---

1 El poemo de A. S. Puŝkin «Poltavo» (1829) (trad. M. Bronŝtejn). *(trad.)*

2 El verko «Mallongigita rakonto pri la akiro de Siberio» de A. N. Radiŝĉev (1749–1802) — rusa proza verkisto, poeto, filozofo, en 1790 mortkondamnita (poste anstataŭe ekzilita) pro sia fama anonime eldonita verko «Vojaĝo el Peterburgo en Moskvon», tre kritika al la tiama sociordo. *(trad.)*

Prologo

Mi vidis maron, mi eltrovis
Mezuron ĝian en avid';
Mi miajn fortojn de spirit'
Antaŭ l' vizaĝ' de ĝi elprovis.

Poleĵajev[3]

En printempo de la 1688-a jaro, antaŭ la printempa Georgo-tago[4], kiu estis festata en Rusujo fine de aprilo, altaj disverŝiĝintaj akvoj de Dvino[5] jam sukcesis elporti la tutan riveran glacion en la Blankan maron. Tuj ekblovis egalaj varmaj ventoj, dispelis malaltajn nubojn, aperis la suno, ekbrilis sur la akvo, sur malsekaj arĝentaj trunkoj de betuloj, sur la kupoloj de preĝejo de la Prezento en la Nikola-Korela monaĥejo, kiu de longe staras super la Nikolaa buŝo de la Norda Dvino.

Sub varmaj humidaj ventoj estis krevantaj betulaj burĝonoj, pleniĝantaj per sukoj folioj de salikaro; Dvinajn herbejojn ĉiutage pli abunde kovradis densverdaj herboj.

En la tago de apostolo Johano[6], en belvetera mateno, laŭ

---

3 Komenco de versaĵo «Maro» (1832) de rusa poeto A. Poleĵajev (1804–1838). *(trad.)*

4 La 23-a de aprilo laŭ la Julia kalendaro (la 3-a de majo laŭ la Gregoria kalendaro, en la 17-a jarcento diferenco inter la Julia kaj Gregoria kalendaroj estis 10 tagoj). *(trad.)*

5 Norda Dvino — granda navigebla rivero norde de la eŭropa parto de Rusio, enfluanta en la Blankan maron; tiutempe ĝi estis la sola sekura komerca arterio, liganta Rusion rekte kun landoj de la norda kaj okcidenta Eŭropo. *(trad.)*

6 La 8-a de majo laŭ la Julia kalendaro (la 18-a de majo laŭ la Gregoria kalendaro). *(trad.)*

ĉeborda vojo el la monaĥejo en la urbon Arĥangelskon[7] traveturis rajdanto — al monaĥejaj servantoj, ĉasistoj kaj fiŝistoj, laboruloj de la mara metio, dungitaj de la monaĥeja ekonomo por malproksima marvojaĝo al la Nova Tero — al Matko[8]. Jam en la vintro la servantoj ricevis de la monaĥejo po sako da greno, grion, salon, vinagron, buteron, kaj ankaŭ monon po kvin altinoj[9] por ĉiu kapo. Nun estis venanta la tempo de repago.

Festeninte en Arĥangelsko du adiaŭajn tagojn, la marlaborantoj sub plorĝemoj kaj lamentoj de virinoj per granda kompanio je ĉirkaŭ kvindek homoj direktis sin plenumi la servon. Malantaŭe, por ke neniu fuĝu survoje, veturis sur ĉevaloj du monaĥoj kun longaj skurĝoj, ĵetante atentajn rigardojn al la paŝantaj kun kanto pomoroj[10]. Pli aĝaj homoj iris solide, kun apogbastonoj, tenante malantaŭ la dorsoj betulbastajn korbojn kun manĝaĵo. La pli junaj interŝercadis, mokadis la monaĥojn, ŝajnigante, ke ili forfuĝas...

En survojaj vilaĝetoj la brigado ripozadis ponelonge, diskutadis kun vilaĝanoj, peĉantaj sur bordoj siajn rem- kaj velboatojn, pri la vojo al la Nova Tero, pri tiea ĉasado, pri tio,

---

7 Arĥangelsko — havenurbo en nordo de la eŭropa parto de Rusio, fondita en 1584 apud monaĥejo de arkanĝelo Mikaelo (de tio devenas la nomo de la urbo), la plej granda urbo de la nordo de Rusio, tiutempe la centro de rusia ekstera komerco. *(trad.)*

8 Nova Tero (Nova Zemlo) — arkipelago el du grandaj kaj kelkaj malgrandaj insuloj en la Arkta Oceano kun severa klimato. Matko — malnova nomo de la Nova Tero, probable devenanta el finno-ugra vorto «matka» — «vojo». *(trad.)*

9 Altino — rusa kupra monero, egala al tri kopekoj aŭ al ses duonkopekoj (de tjurka vorto, signifanta «ses»). *(trad.)*

10 Pomoroj (laŭvorte «ĉemaruloj») — specifa etna grupo de rusoj kaj kareloj ĉe la Blanka maro, okupiĝinta precipe pri mara kaj rivera fiŝkaptado. *(trad.)*

kiel akiri rosmaron. La vilaĝanoj rakontadis realaĵojn kaj elpensaĵojn pri monaĥejaj barkoj, kiujn elfaris barka majstro Timoteo Koĉnev, kromnomata Rafano. Unuj diradis, ke la barkoj estas trimastaj, por dek mil pudoj[11], aliaj ĵuradis per Dio, ke pli multe, la triaj rakontadis, ke kondukos la tutan brigadon en la maron nun ne avo Mokeo, sed alia rudristo, el junuloj, kiu — oni ne scias ĝuste.

Ĉe la blankaj muroj de la monaĥejo, apud la pordego, la servantojn renkontis la monaĥeja ekonomo patro Agafoniko, kun li staris maljunulo rudristo Mokeo kaj malalta fortmuskola Koĉnev. La servantoj rompis sian kantadon, riverencis. Riverencis ankaŭ Agafoniko. Li sciis: la pomoroj ne ŝatas fleksi la dorson, riverencon respondu per riverenco; se vi ne respondos dece, kun estimo — kulpigu nur vin mem.

— Ĉu bone vi ĝisiris, infanoj? — demandis avo Mokeo, ĝoje ĉirkaŭrigardante la fortikajn, larĝŝultrajn fiŝistojn, multajn el kiuj li konis ankoraŭ kiel knaboj-ĥaradrioj.

— Ĝisiris ni bonorde! — per forta kaj malalta voĉo respondis anstataŭ ĉiuj juna rudristo Rjabov. — Ĉu vi mem statas bone, avĉjo?

Mokeo demalsupre ĵetis rigardon al Rjabov, ridetante balancis la senĉapan grizharan kapon.

— Kial vi balancas? — same ridetante demandis la rudristo. — Ĉu mi per io vin ĝenis, avĉjo?

— Forta vi estas, nepeto, — admirante la junan rudriston, prononcis Mokeo. — Jen, forta! Vivis vi orfe, manĝadis gadon kaj panon, sed kiel kreskis! Jen, alta, kvazaŭ masta pino...

---

11 Pudo — malnova rusa mezurunuo de pezo, proksimume 16 kg. *(trad.)*

Li turniĝis al Agafoniko, diris al tiu kun signifo:

— Ĝuste pri li estis dirite hieraŭ, patro ekonomo. Li de infanaĝo estadis en la maro, kvankam juna, tamen ĉion spertis, la kompason konas, per steloj navigadis, la brigado post li kien ajn iros...

Agafoniko kapjesis, ordonis al la homoj demeti la dorsosakojn kaj iri al laboro. En la monaĥejo oni ne nutradis servantojn senpage...

Vespere el la pordego de la monaĥejo eliris la prioro en ornato, akompanata de la frataro. La monaĥoj iris pare, mallevinte la kapojn en cilindraj ĉapoj. Dolĉe ekodoris incenso. La prioro aspergadis la barkojn, destinitajn por surakvigo, per sankta akvo, tintadis per la incensilo, la monaĥoj kantadis per sataj voĉoj. La marlaboruloj en blankaj puraj ĉemizoj, en vadbotoj, laciĝintaj dum la tago, staris malproksime, oscedetante. La helpanto de la majstro Koĉnev — oĉjo Jermilo, nigrabarba, hirta, makulita per peĉo viro, — nelaŭte plendis al Rjabov:

— Ol servi al monaĥejo — pli facilas morti. Per trezoroj plenas la staploj, sed ili plu avaras. Korelin Ivano Kononoviĉ dum kvar tagoj kun ili kverelis! Koĉnev tute elturmentiĝis kun ili, sangosuĉuloj. Ni diras al Agafoniko, kolera diablo, ke por oceana iro estas tiuj ĉi barkoj, por al Grumanto[12] iri, al Matko, al aliaj malproksimaj teroj; ke estos granda profito por la monaĥejo, — li ne aŭskultas! Pro ĉiu fera najlo li la animon elskuos. Sur tiaj barkoj vi kiom da nura fiŝdento[13] alveturigus

12 Grumanto — malnova rusa nomo de arkipelago Svalbardo (Spitsbergen) en la Arkta oceano, nun apartenanta al Norvegio. *(trad.)*

13 Fiŝdento — malnova nomo de rosmara dentego. *(trad.)*

por la monaĥejo...

— Ne ili en la maron iros! — diris la rudristo. — Ili sur la bordo sidos, al Dio preĝos.

La diservo finiĝis, Jermilo ekkuris al majstro Koĉnev, portis al li toporon kun longa tenilo — por elbati la apogilojn. La barkoj, destinitaj por surakvigo, sen mastoj kaj sen rigilaro, staris sur trabaj skafaldoj apud la akvo mem sur la malkruta bordo de Dvino. La dikventraj, peĉitaj grandegaj karenoj kvazaŭ petis, ke oni kaŝu ilin en la maro.

— Kaj vere tempas! — diris avo Mokeo. — La barkojn Timoteo bonajn elkonstruis, la rivero en inunda akvo komencis malaltiĝi, estas ĝusta tempo por surakvigo. Ni riglos, kaj vi iros, Ivano Sabateiĉ, en la maron; homoj diras, ke de glacio puriĝis, vivas nia kara maro...

Koĉnev prenis de Jermilo la toporon, kraĉis al la polmoj, suspiris. Ili ambaŭ — la majstro kaj la helpanto — kune levis la toporojn, samtempe batis al la traboj, apogantaj la pobon de la barko. La barko balanciĝis sur la grandegaj, lubrikitaj per fokoleo, lignaj glitiloj, ekrampis al la akvo la pobon antaŭen. La marlaboruloj reteninte spiron, sen ĉapoj, rigardis, ĉu konvene malleviĝas la barko. Se ĝi estos lerte surakvigita — ili vivos jaron sen embaraso. Kaj se io okazos dum la mallevo — prepariĝu al malfeliĉo.

— Bone ekbalanciĝis! — diris avo Mokeo. — Bona vojo al vi estos, rudristo!

Tuj kiam estis surakvigita la unua barko, ĉarpentistoj komencis levi sur ĝi la maston. Post la unua oni surakvigis ankoraŭ unu — dumastan, post tiu — la trian. Super la rivero

vice, gaje ekfrapis hakiloj, ankoraŭ multon necesis ĝisfari jam surakve. La alpelitaj el la urbo servantoj kune kun monaĥejaj ĉarpentistoj laboris en blankaj noktoj, ne nur tage. Timoteo Koĉnev, maldikiĝinta, kun hirta barbeto, seka, fortika, mem rigiladis la barkojn, kvereladis kun ekonomo Agafoniko, minacadis al li, ke jen alveturos de Moskvo Ivano Kononoviĉ — estos granda bruo. En rigilado al Koĉnev helpadis Rjabov; avo Mokeo pli multe sidadis sur la bordo, rigardadis al blankflugilaj mevoj, meditadis. La kruroj jam malbone obeadis la maljunulon, leviĝi sur barkojn estis al li malfacile.

Kiam Rjabov havis liberan tempon, li alsidiĝadis al la maljuna rudristo, pridemandante lin pri ĉio, kion tiu spertis dum sia vivo, atente aŭskultadis instruojn.

— Se vi en glaciojn trafos — ne timiĝu! — instruadis Mokeo. — Kio por malbonulo estas ĝis la oreloj, tio por bravulo estas ĝis la genuoj. Vi gardu vin kontraŭ glacioj, sed se trafis — ne timiĝu. Glacipecego iras, ŝriko, ĝemo, estas unu penso: viva vi ne elpuŝiĝos. Sed vi tiun penson ne lasu iri. Niaj barkaj majstroj estas homoj kun kapoj, de la praavoj konstruas la barkojn tiel, ke dispremi ilin estas malfacile, la karenoj, ĉu vi rimarkis, kiaj estas? Kvazaŭ ovo! Do, jen pensu. Kaj ja ne unuan fojon vi tion spertos — vi estis en glacioj, tiam ni kune trafis... Plu aŭskultu: se vi ekvintrumos, jen al vi mia konsilo, infano: la tutan brigadon tenu kun granda severeco, por ke la homoj ne plezurigu sin per dormo, aŭ per malgajo-enuo. Se vi ilin kompatos — vi ilin entombigos. La homoj de nia metio ne vane pri vintrumadoj kun malĝojo diras: homoj mortas — por ni vojon metas, la antaŭa por la malantaŭa estas ponto al tombo. Severeco, Ivano Sabateiĉ, en embaraso estas la plej

grava afero.

Rjabov subite ekridis.

— Kial vi gajas? — miris avo Mokeo.

— Kiel mi en la antaŭlasta jaro kun vi, avo, vintrumis, mi rememoris! — diris Rjabov. — Falis mi tiam dormi, kaj vi min per ŝnuro, per ŝnuro...

La avo same ekridis, bonkoraj faltetoj aperis ĉirkaŭ liaj okuloj.

— Koleris vi tiutempe...

— Koleris, sed restis viva. Kaj vi min, avĉjo, pelis rosmaran grason gardi...

Mokeo ekridis pli:

— Estis, estis tio. Venadis al ni blanka urso trinki rosmaran grason...

— Ĉirkaŭ kvin pudojn por unu fojo tiu urso eltrinkis! — diris Rjabov. — Mi ĝin, damnitan, faligis, kaj vi tuj kun barelo. Transverŝi reen, dum ĝi estas varma...

Aliris Koĉnev, demandis:

— Pro kio ridoj ja?

— Jen, mi la blankan urson rememoris! — diris Rjabov. — En la Nova Tero tio okazis. Do, kio, ĉu baldaŭ ni ekiros, sinjoro barka majstro?

Koĉnev pensis, respondis ne tuj:

— Verŝajne dimanĉe.

...En la nokto antaŭ sabato ĉiuj ses barkoj — tri novaj kaj tri malnovaj — estis pretaj por malproksima mara vojo. Monaĥeja

patro-armilisto estis eldonanta al la servantoj-ĉasistoj ilaron por ĉasado al rosmaroj laŭ kalkulo, — fero valoris multe. Aliaj monaĥoj estis vice portantaj sur la barkojn dujaran rezervon — farunon en sakoj, barelojn kun grioj, salon, buteron. Sur la barkoj en kajutoj pro humida vetero estis hejtataj fornoj; la homoj, pretaj al eliro en la maron, jam loĝis ne sur la bordo, sed sur la barkoj.

Rjabov, en surĵetita sur la larĝajn ŝultrojn drapa kaftano, en fiŝistaj, ĝis la femuroj, juftaj, ŝmiritaj per fokoleo vadbotoj, en trikita kamizolo, staris ĉe la ponteto kaj nelaŭte parolis kun adoleska knabo, aĝa ĉirkaŭ dek kvar. La knabo estis en rufiĝinta sutano, trivita skufio[14], liaj nigraj okuloj arde rigardis al Rjabov.

— Vi kaŝiĝos malantaŭ la sakoj! — estis diranta Rjabov. — Neniu vin, infano, rimarkos. Kvazaŭ vi ekdormis sur la barko, kaj kiel oni eliris en la maron — vi ne rimarkis. Jen la tuta afero.

La knabo jese balancis la nigraharan kapon kaj desaltis sur la barkon.

— Sur la pobon iru! Ĉu vi aŭdas, Metrio[15]? — kriis Rjabov.

La knabo, lamante, malaperis trans bareloj kaj sakoj.

— Oni forronĝos lin ĉi tie! — diris Rjabov al Mokeo. — Li interpretas sur eksterlandaj ŝipoj, sed kia en tio estas utilo por la knabo? Li interpretas, kaj la tuta mono, kiun oni pagas, iras al la monaĥejo. En la pasinta jaro, kiam ni en la maron foriris, li ĉi tie tute malsatiĝis...

---

14 Skufio — nigra ronda ĉapeto, ĉiutage uzata de ortodokskristanaj monaĥoj kaj klerikoj, iam de novicoj. *(trad.)*

15 Metrio — mallongigita en popola maniero nomo Demetrio. *(trad.)*

Mokeo suspiris:

— Orfo: kiu ne pigras, tiu lin batas. Se li ellernos — iĝos bona maristo.

— Vere, li estas klera, — diris Rjabov. — Kaj skribas, kaj la kompason scias. Kie estas pasejo en maro, kie ni kurson ŝanĝas, li enskribos, kaj poste legos. Kaj por li estas bono, kaj por aliaj ne sen utilo.

Matene dimanĉe, post kiam finiĝis diservo por navigantoj kaj vojaĝantoj, la ekonomo aliris al la amaso de la servantoj, riverencis, petis veni al la adiaŭa tablo — ne neglekti la moron de la avoj. La tablo estis starigita en la monaĥeja refektorio[16] — tio signifis eliron en la maron, adiaŭon kun la hejma tero por longe. Sub la sanktfiguroj en la ikonangulo eksidis nur hodiaŭ alveturinta barka majstro Korelin Ivano Kononoviĉ, fama pro siaj barkoj en la tuta Blankmario, dekstre de li — ekonomo Agafoniko, maldekstre — avo Mokeo, apud li — Koĉnev, disĉiplo de Ivano Kononoviĉ. Monaĥo ĉe pupitro legis preĝon, Rjabov flustris al Koĉnev:

— Ĉiam nur preĝas la monaĥoj! Sed fiŝistaj vidvinoj de ili farunon aŭ buteron ne ĝisatendos!

Post la preĝo novicoj, mallevinte la okulojn, verŝis el argilaj kruĉoj vodkon en kruĉetojn — por fiŝistoj kaj ĉasistoj, rudristoj kaj barkaj ĉarpentistoj. Ili drinkis po unu — unue, la popolo ekparolis pli vigle, la langoj malligiĝis, ŝutiĝis ŝercoj.

Pli poste, kiam la popolo jam bruis, avo Mokeo laŭte demandis ekonomon Agafonikon:

---

16 Refektorio — granda ĉambro por komuna manĝado en monaĥejoj (PIV). *(trad.)*

— Kaj ĉu scias vi, patro, kiel anseroj flugas sub la ĉielo?

La monaĥejaj servantoj tuj eksilentis, atendante ŝercon, sed la avo rigardis al la ekonomo negaje, preskaŭ severe.

— Flugas kaj flugas, kiel la Sinjoro ordonis! — respondis la ekonomo.

— Jene, kiel ordonis! La flugilojn ili disetendas, la nazojn antaŭen, kaj flugas! Vere, flugas rekte! Kaj sian grupon, brigadon ĉiam gvidas gvidanto...

En la refektorio tuj iĝis tute senbrue, la popolo ĵetadis rigardojn jen al Mokeo, jen al la juna Rjabov.

— Kaj devas gvidi en ilia afero la plej forta, lerta, saĝa, alie la gvidanto mem la unua en maro-oceano pro laco falos, — ĉu mi prave diras? Estas malproksime flugi el varmaj landoj, patro, al ni — al Kolgujevo, kaj al Morĵoveco, kaj al Vajgaĉo, ho, malproksime. Juĝu nun vi mem — kien via monaĥejo nin sendas? Ne al proksimaj lokoj. Al la Nova Tero iru la marlaboruloj, al Matko. Por vi ja el ĉi tie ĉio aspektas proksime, sed ni scias — ne unuan fojon ni tien sub veloj kuras... Gvidanton la brigado bezonas.

— Do, ĝuste vi estu la unua rudristo, — singarde respondis Agafoniko. — Kiel vi antaŭe iradis — tiel ankaŭ nun iros.

— Ne! — turnis la grizharan kapon Mokeo. — Mi jam sufiĉe iradis, patro.

Kaj, ĉirkaŭrigardinte la festenon, la avo laŭte, per severa voĉo demandis:

— Ĉu plaĉas al vi, fraĉjoj, kiel la unua rudristo Rjabov Ivano filo de Sabateo?

La homoj respondadis ne haste, unu post la alia, trankvile, unue maljunuloj, poste pli junaj.

— Plaĉas Ivano Sabateiĉ! — diris fiŝisto Kopilov.

— Bona ulo, plaĉas! — kapjesis nigrahara, kun akra rigardo rudristo Nilo Longinov.

— Plaĉas!

— Li estu la rudristo super la brigado!

— Plaĉas al ni Ivano filo de Sabateo!

— Lia patro kiel unua rudristo iradis, kaj nun — li...

— Li respondon diru!

— Laŭ la moro, laŭ la tradicio!

— Kiel de la avoj ĉe la Blanka maro ni faras!

Rjabov ekstaris de la benko, apoginte sin per la potencaj manoj je la tablo, riverencis al la popolo al tri flankoj, dankis ĉiujn, kun kiuj li plurfoje iradis en maron, diris, ke estas tro granda por li la honoro. La popolo ekzumis, ke ĝi petas la honoron akcepti. Rjabov senvorte turniĝis al avo Mokeo, kiu kun emocio atendis tiun ĉi minuton. Antaŭ multaj jaroj alia maljuna rudristo same transdonis la brigadon al la juna Mokeo, kiel nun la avo Mokeo transdonos ĝin al Rjabov.

Ne haste, nelaŭte Mokeo komencis fari demandojn:

— Ĉu konas vi favorajn ventojn, Ivano Sabateiĉ?

— Konas, avĉjo! — trankvile kaj certe respondis Rjabov.

— Profundojn marajn, subakvajn ŝtonojn, malprofundaĵojn, rifojn vi konas?

— Tiel, avĉjo, konas.

— Ondojn kolerajn, ventojn fortajn, ondojn disajn — ĉu konas vi?

— Konas, avĉjo!

— Vojojn barkajn malproksimajn al Grumanto, al Matko, al Kolgujevo, al fremdlando, reen al Rusujo ĉu konas vi, rudristo?

— Konas, avĉjo!

— Stelojn noktajn, kompason ĉu konas vi?

— Konas.

— Ĉu vi ĵuros al honestaj patrinoj fiŝistaj, al edzinoj kaj etaj infanoj, ke dum vi estos viva — ne lasos la fiŝistojn en mara malfeliĉo?

— Mi ĵuros, avĉjo!

Avo Mokeo malagrafis saketon, kiu pendis sur lia zono, elprenis el ĝi malnovan, enmuntitan en flaviĝintan eburon kompason, metis ĝin antaŭ Rjabov, diris severe:

— De la brigado!

— Mi scias.

— Kun ĝi vi iros. La kompaso estas bona...

La vizaĝo de la maljunulo tute severiĝis. Rjabov mallevis la kapon, malforta ruĝo ekludis sur liaj vangoj.

— Ŝajne, ĉio estas dirita, — prononcis Mokeo, — sed pri ankoraŭ unu afero necesas mencii...

Li suspiris, suspiris ankaŭ aliaj, — multaj el la sidantoj ĉe la tablo sciis, pri kio temas.

— Mi diras ne por riproĉi vin, — ne rigardante al la rudristo, diris Mokeo, — mi por gardo diras kaj laŭ la moro:

estu singarda, Ivano Sabateiĉ, kun vino. Por kio ĝi taŭgas?

Rjabov silentis.

La avo ankoraŭfoje suspiris, milde, sen riproĉo aldonis:

— Se vi furiozos en ebrio — pereos via kapo. Komprenu, infano, rezonu mem: al malfeliĉo ĝi, malbenita, neniel helpos, sed kiom multaj niaj de la Blanka maro laborantoj pro ĝi la vivon perdis...

— Sed se ĝi ĝojon ne donas, la vivo, — tiam kiel? — nelaŭte demandis la rudristo kaj eksilentis, atendante respondon.

Mokeo deziris ion diri, eĉ flustris ion per la lipoj, sed subite svingis la manon kaj leviĝis. Tuj ekbruinte, leviĝis la ceteraj...

El la refektorio la marlaboruloj eliris post liturgia servo. La ĉielon kovris nuboj, estis malgranda pluveto, mevoj, larĝe disetendinte la flugilojn, kun krioj estis ĵetiĝantaj super Dvino. La homoj disiris sur la barkojn, ekknaris vinĉoj, levante ankrojn.

— Ĉu al la Nova Tero iras ĉiuj ses? — demandis Ivano Kononoviĉ, ĉirkaŭrigardante la barkojn.

— Tien! — respondis Koĉnev.

— Multe nun.

— Al Grumanto de la Pertominska monaĥejo, oni diras, nun oni iros sur kvar barkoj. Al Kolgujevo metiistoj el Onego intencas iri sur ne malpli sep barkoj...

Ivano Kononoviĉ reĝustigis la okulvitrojn sur la karnodika nazo, diris kun saĝa subrido:

— Antaŭ nelonge, en Moskvo, estis mi en tola fabriko, parolis kun majstroj, kiel por ni, pomoroj, bonan velaĵon teksi. Poste, por promeno, mi vagis sur bordon de rivereto Jaŭzo. Mi vidas — kuras tie ŝipeto malgranda, ne pli granda ol nia Dvina boateto, sur kiu virinoj lakton veturigas. Prameto! Sed kiom da popolo estas ĉirkaŭe! Multege! Kio, mi demandas, ĉe vi, kristanoj, okazis? Tiam unu kun tiela barbego, en peltmantelo, en altega ĉapo, al mi respondas: «Caro, li diras, Petro Aleksejeviĉ de angla klera fremdulo marajn artojn adoptas kaj por tio sur tiu ĉi ŝipo, nomata *Boot*, sin ekzercas!»

Korelin ekridegis, ektusis, svingis la manon:

— Sur ŝipo! Jen kiel! Nomata *Boot*! Ĉu vi aŭdis, Timoteo? Deziris mi al tiu bojaro diri vorton, sed maldecidis, por li de sur ĉevalo kaj en pelta ĉapo pli bone videblas, kie estas ŝipo kaj kie estas angla klera fremdulo...

Ili ankoraŭ staris iom sur la bordo, akompanante per rigardo la barkojn, kliniĝantajn sub veloj en freŝa vento, silentis iom, poste ekiris al ĉareto, kiu atendis ilin ĉe la pordego de la monaĥejo...

— Kaj kian vorton vi, Ivano Kononoviĉ, deziris al la bojaro diri? — demandis Koĉnev, kiam la ĉareto ekmoviĝis.

— Ja tian, amiko mia bona, — ne tuj respondis la barka majstro, — tian ruzan vorton: riverencu al la caro, bojaro, por ke li ne de angla klera fremdulo marajn artojn adoptu, sed al ni veturu — al Lodjmo, aŭ Kemo, aŭ Onego, aŭ al Arĥangelsko-urbo. Ne vane oni diras: la Arĥanĝela urbego estas de la tuta maro pordego. Ĉe ni eblas multon vidi...

Parto unua
En Arĥangelskon

Min liberigu el la man'
Potenca de popoloj fremdaj...
Lomonosov[17]

En mezo staru Oceana!
Derĵavin[18]

17 El «Parafrazo de la psalmo 143» (1743) de M. V. Lomonosov (1711–1765), la unua rusa mondvalora naturscienciisto kaj elstara rusa poeto. *(trad.)*

18 El versaĵo «Floto» (1795) de elstara rusa poeto G. R. Derĵavin (1743–1816). *(trad.)*

Ĉapitro unua

De l' Petra nesto la birdidoj.

Puŝkin[19]

Ne roso donas rikolton, sed ŝvito.

Proverbo

1. La luda armeo

En sufoka junia mateno cara trajno sub densa sonorilado, anoncanta fruan liturgion, preteris la Teran urbon[20] kaj nehaste direktiĝis al la Trinitata monaĥejo. Moskvo estis nur ankoraŭ vekiĝanta: noktaj gardistoj estis forigantaj barierojn, kiuj baris la stratojn kontraŭ maliculoj; estis forirantaj nedormintaj gardpostenuloj kun halebardoj kaj batalhakiloj; botisto, ankoraŭ ne tute vekiĝinta, oscedante kaj krucosignante la buŝon estis pendiganta boton super sia mizera budo; tajloro estis dismetanta akrakoloran kaftanon; fiŝisto samtie dum irado estis laŭdanta siajn karasojn kaj bramojn, ankoraŭ movetantajn la brankojn en basta korbo. Sub egalaj malgajaj batoj de tamburino estis dancanta inter la komercantoj kalviĝinta urso en ĉapelo kun plumo. El tendoj korpulentaj inoj etendadis la manojn, proponante sian varon — blankan ŝminkon kaj ruĝigilon, kaj ankaŭ boligitan fulgon — por nigrigi brovojn. Samtie estis kverelantaj kaj interpuŝantaj senlaboraj popaĉoj kaj ĉion fordrinkintaj diakonoj, proponante fari por malmulta

19 El poemo «Poltavo» de A. S. Puŝkin. *(trad.)*

20 Tera urbo — historia loĝata urboparto de Moskvo, situinta ekster la centraj partoj. *(trad.)*

prezo liturgion, funebran aŭ alian diservon. Inter ili ŝoviĝadis tien kaj reen alta ulo — serĉis siajn malaperintajn botojn kaj ĉapon. En la nuksa vendovico oni krakigadis por provo nuksojn, en la meda oni gustumadis medon. Barbiroj ĉe la muro, en malvarmeto, frapadis per tranĉiloj, vokante la popolon razi la kapojn, tondi la harojn, laŭdante per rapidaj rimoj ĉiu la sian arton:

— Niaj raziloj akras, ni moskvanoj ĉion lerte faras, sapon grekan ni liveras, akvon el Moskvo-rivero, tranĉiloj niaj estas akraj, manoj niaj estas lertaj...

— Aĥ, ni razos, jen ni razos...

— Ni tondas, razas, venu homo el ĉiu domo...

Barba viro kun bana folifasko, kun friponaj senhontaj okuloj, estis iranta, persvadanta per dolĉa voĉo:

— Banigi-ŝvitigi, brava igi, kiu kuraĝas kaj tempon havas, venu kun mi, ne bedaŭros...

Caraj ludsoldatoj, Lukov kaj Aleksaĉjo Menŝikov[21], kliniĝinte de sur la seloj, demandis la viron:

— Ĉu multe kostas via gajo, oĉjo?

La viro faris forsvingan geston:

— Ho, karuloj, ĉesu ŝerci. Veturu laŭ via vojo...

— Sed nia vojo ja iras en vian banejon...

— Iru for kun Dio, iru...

---

21 Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov (1673–1729) — persona helpanto de Petro la Granda de nenobela deveno (poste ricevinta titolon de princo), rusia ŝtata kaj milita aganto, post la morto de Petro fakta reganto de la Rusia Imperio en 1725–1728. *(trad.)*

Aleksaĉjo Menŝikov baŭmigis la ĉevalon, pikis ĝin per la spronoj, atingis la ceterajn ludsoldatojn. La bruo kaj diversvoĉa krio de la vendovicoj restis malproksime malantaŭe; la cara trajno, knarante per aksoj, serpentumadis el strateto en strateton; la veturigistoj pigre vipadis la ĉevalojn, nelaŭte interkvereladis, interŝercadis inter si. Lukov rajdis malantaŭe, kriadis al Menŝikov:

— Hej, for, gardu vin...

Ĉe la kapo de la trajno dece rajdis Ĉemodanov, Jakimo Voronin, Silvestro Ievlev, mokante la caran mentoron Francon Teodoroviĉ-on Timmerman-on. Tiu, mallerte sidante en alta marokena selo, timeme tirante la riĉajn kondukilojn kaj tenante la botojn kun pintoj internen — por ne sproni senintence la eksstalonon, — estis miranta:

— Ĉu mi povis tiel pensi? Mi supozis: amuzo estas amuzo. Kiam lia cara moŝto bonvolis amuzi sin per navigado sur Jaŭzo...

— Pereis vi nun, Franco Teodoroviĉ! — diris Jakimo Voronin. — Nun vi konstruos ŝipojn...

— Ja li eĉ ne scias, kia estas ŝipo! — ekridis malantaŭe Lukov. — Probable, vi forgesis, Franco Teodoroviĉ?

Aleksaĉjo Menŝikov, strabinte al Timmerman per la diafanaj okuloj, promesis kun gaja minaco en la voĉo:

— Li rememoros! Kaj se ne deziros rememori — li mem respondos. Ĉu vere, Franco Teodoroviĉ? Li ankaŭ asistantojn havas — holandajn maljunulojn. Triope ili rememoros...

Timmerman estis timide ridetanta, la ludsoldatoj ridegis pri lia ektimo.

Ĉirkaŭ la tagmezo, fore antaŭinte la caran trajnon, kune kun Timmerman ili trairis la urban limon. La Moskva nigra polvo kun cindro, la bruo de la kurbaj stratoj, la urba sufoka aero — restis malantaŭe. Herbejoj kaj apudmoskvaj arbaretoj spiris en la varmegajn vizaĝojn odoron de falĉitaj herboj, varmigitan de la suno foliaron, bonan kvieton.

Sensone fluis rivero, allogante per malvarmeto, ripozo.

Aleksaĉjo Menŝikov krie vokis baniĝi, deĵetis la nielitan sabron kun damaskenaĵo, hodiaŭ donacita de la caro, la multekostan paradan kaftanon, la botojn sur altaj kalkanumoj, svinge krucosignis sin kaj, fleksiĝinte arke, ĵetiĝis en akvon. Post li, kurante kaj ŝrikante dum kurado, ĵetiĝis en la rivereton Voronin, post Voronin — Ievlev. Dum ĉiuj banis sin, Franco Teodoroviĉ sidis sur la bordo, sub saliko, pensis siajn malgajajn pensojn: kiel, vere, fariĝos, se necesos konstrui ŝipojn por la cara amuzo? Ĉu estas facila laboro — konstrui ŝipon, eĉ la plej malgrandan? Kaj kiu helpos?

La ludsoldatoj kriadis en la akvo, ŝprucigadis akvon, lude dronigadis unu la alian. Plej multe furiozis Menŝikov. Franco Teodoroviĉ, rigardante al li, eĉ la kapon balancis: jen sorto! Li ĵus venis el la cara ĉevalejo, sed jam kun princoj kondutas sen ceremonioj, kaj eĉ Apraksin-on ne timas...

Ili baniĝis longe, kiel baniĝas knaboj, ĝis bluiĝis. Por varmiĝi, ili komencis peli unu la alian sur la bordo; ili faladis, levante nubojn da sablo; interluktadis kun ĝemado kaj oĥado. Menŝikov, kun ruza vizaĝo palpebruminte al Timmerman, kvazaŭ dirante — «silentu, maljunulo!» — ligis per firmaj nodoj la manikojn de la ĉemizoj, verŝis per akvo, surŝutis per sablo; tian nodon ne eblas malligi tuj, kaj se iu saĝulo tiros per

la dentoj — prenos sablon en la buŝon. Franco Teodoroviĉ ridetadis — infanoj, veraj infanoj!

Varmiĝinte, ĉiuj denove ĵetiĝis en la rivereton — purigi sin. Ĝuste tiutempe sur la vojo trans arbareto aŭdiĝis krioj, fajfado de knutoj, knarado de aksoj. Izmajlov — diketa, rozkolora, kolera — sur granda nigra blankkrura virĉevalo kiel vento elflugis el trans la arboj, kriis, haltigante la ĉevalon super la rivero:

— Ni tie turmentiĝas, eble, dum tuta horo, kaj ili, sentaŭguloj, jen kion faras? Bone, ekscios Petro Aleksejeviĉ, estos al vi karesa vorto! Vestiĝu ĉiuj tuj!

Li baŭmigis la ĉevalon, spronis kaj malaperis en la arbareto.

Franco Teodoroviĉ leviĝis, forgesinte pri sia eksstalono, rearanĝante sur la ronda ventreto la kaftaneton, reĝustigante sur la kolo la ĉiaman blankan koltukon, ekkuris la flankon antaŭen post Izmajlov. Post li, rapide vestinte sin, saltis sur sian falvan ĉevalon Menŝikov. Aliaj en malespero estis fingrumantaj la nodojn, insultantaj per sakraj vortoj Aleksaĉjon, kurantaj al la ĉevaloj duonnudaj...

Sur vojo, iranta supren, ĝis la aksingoj mem ensabliĝis kvinaksa ĉarego, sur kiu per kanabŝnuro estis alligita la cara luda boato. Pafistoj, rajdistoj[22], ĉarpentistoj, anoj de la cara sekvantaro, malhelpante unu la alian, interpuŝante, estis levantaj la radojn per lignaj stangoj, submetantaj trabojn, knutadis la elturmentitan, anhelantan jungitaron...

---

22 Pafistoj (стрельцы) — infanterianoj de «malnova ordo» en Rusio ĝis la 18-a jarcento . Rajdistoj (рейтары, de germana Reitar) — pezaj kavalerianoj (kirasistoj) de «nova ordo» en Rusio de la 17-a ĝis la 18-a jarcentoj (poste ili estis transformitaj al dragonoj). *(trad.)*

Rekoninte la caron el malproksime laŭ lia grandega alto, Menŝikov preskaŭ dum galopo deĉevaliĝis kaj kriis el post la dorso de Petro, kvazaŭ estus nenien foririnta kaj ĉiam estis ĉi tie:

— Ek, disiru, ne staraĉu! He, homoj, ne malhelpu malhelpi, ĉi tie eĉ por unu ne estas afero! Veturigistoj, prenu kune, ne gapu, puŝu akorde!

Petro Aleksejeviĉ kuspis la manikojn de la ŝirita kaj malpurigita per gudro ĉemizo, minacis al Menŝikov per la pugno, lace viŝis per la polmo la ŝvitan vizaĝon. Aleksandro Daniloviĉ depuŝis Petron per la ŝultro, kaptis la ronkantan timonĉevalon je la kolbrido, per la alia mano turnis al si la timonon, kriis per kobolda voĉo, tiel, ke la jungitaro el tridek ĉevaloj ektiris kune. La boato tremeris, la ĉaregoj eliĝis el la sablo. Petro, ridetante pri ĉiamaj Aleksaĉjaj ruzaĵoj, surmetante dum irado la kaftanon kun la manikoj, ekiris antaŭen.

Antaŭvespere la caran trajnon atingis Boriso Aleksejeviĉ Golicin — li alveturigis al Petro benon de la carino Natalja Kirilovna kaj ŝiajn vortojn, ke Peĉjo nepre estu ĉe la Trinitato kaj preĝu dece. Petro brileris per la brunaj okuloj, gaje respondis:

— Ĝuste por tio ni veturas, Boriso Aleksejeviĉ...

— Oj, Petro Aleksejeviĉ, ne por tio, mi pensas, ni veturas! — balancis la kapon Golicin.

— Kiam ni finos la aferon, tiam ni preĝos! — komencante koleri, diris Petro.

En la arbaro, en paradiza antaŭvespera freŝeco estis sternita tapiŝo por vespermanĝi. Ievlev, Teodoro Matejeviĉ Apraksin

kaj Lukov nemalproksime estis plukantaj grandajn fragajn berojn, interparolantaj per lacaj voĉoj. Jakimo Voronin, kaŝiĝinte, estis krianta kiel gufo.

— Kaj tute ne similas! — laŭte diris Apraksin. — Kiel hundo boji scipovas nia Jakimo, sed kiel gufo — ne similas...

Voronin ekbojis kiel hundo.

— Kaj Menŝikov kaŝiĝas de ni! — diris Ievlev. — Timas! Bone, Teodoro Matejeviĉ, ni ĝisvivos nian horon, li rememoros, kiel ligi nodojn kaj per sablo surŝuti...

Menŝikov kriis:

— Ek, venu kontraŭ mi manbatali! Ĉu ĉiuj kontraŭ unu? Venu, mi ne timos!

Dum ili vespermanĝis, pretere sur la vojo, tondrante sur radikoj, kun knarado kaj bruado estis veturantaj ĉaregoj kun ŝipaj provizaĵoj, por konstrui sur la lago ludan floton. En bareloj kaj bareletoj estis veturigataj rezino, fiŝgluo, amase ligitaj per basto tiliaj, kverkaj, pinaj moskvo-riveraj tabuloj, en sakoj — kapra lano por kalfatri ŝipojn, en korboj — ŝnuregoj, ŝipaj fadenoj, veltolo...

Pendiginte la piedojn de sur la bordero, sur ĉarego traveturis la maljunaj holandaj ŝipistoj, ambaŭ ili havis konsternitajn vizaĝojn — ĉu pro rapida kaj skua veturado, ĉu pro tio, ke ili devis konstrui la ludan floton...

Boriso Aleksejeviĉ Golicin akompanis la holandanojn per rigardo kaj, turnante valoran ringon kun diamanto sur la maldika fingro, diris:

— Antaŭ nelonge mi demandis la maljunulojn — ĉu ili

kontentas, ke ili revenas al sia metio. Ili interrigardis — respondi ne kuraĝis...

Kaj li ruze ekridis.

Petro, ne aŭskultante, avide maĉante kokaĵpirogon, per la okuloj estis kalkulanta la ĉaregojn, ne povante trovi tiun, sur kiu oni veturigis likvan rezinon.

— Ja jen ĝi, Siro! — diris Ievlev. — Jen, ses bareloj...

La caro, albatinte kulon sur la kolo, ordonis doni liston de provizaĵoj — ĉu la tuta provizo estas prenita, ĉu ne estas forgesita io. Silvestro Petroviĉ Ievlev prenis duan liston. La caro estis leganta, Ievlev estis markanta per krucetoj ĉion, kio estis ŝarĝita en lia ĉeesto.

— En tiu ĉi vespera tempo, sinjoroj ŝipistoj, endas por ni elfumi po pipo da bona tabako! — faldinte la liston, diris Petro.

La ludsoldatoj eltiris la pipojn el sakoj kaj poŝoj. Petro plenigis sian pipon la unua, ekfumis, ektusis. Sur la okuloj de Ĉemodanov aperis larmoj. Lukov estis fumanta fervore, sidis tuta vualita de griza fumo.

— Ŝipistoj fumas nikotianon en tavernoj kaj drinkejoj! — diris Petro. — Ĉu tiel, Silvestro?

— Tiel! — sufokiĝante de fumo, respondis Ievlev.

— Ne ekzistas tia vera ŝipisto, kiu ne konus pipon! — senfortiĝante, diris Petro. — Kaj kiu pipon ne fumas, estas ne ŝipisto, sed malbravulo!

Li estis sufokiĝanta, sed rigardis firme. Tamen, ĉiuj ili rigardis firme unu al la alia, nur iliaj okuloj estis kovritaj de humido kaj estis zumado en la oreloj. Se ili estas ŝipistoj, tiam

necesas fumi tabakon!

Atente rigardante al la ŝipistoj, al tio, kiel ili suferas kun siaj pipoj, kiel ili elmetas la larmokovritajn okulojn kaj kiel ili tusas, estis ridetanta la bela Golicin, karese pensanta: «Ho, juneco, juneco! Kion oni ne faras en tiu ĉi aĝo? Probable, supozas ili, ke vere estas maristoj aŭtentikaj!»

— Pri kio vi ridetas? — per voĉo kvazaŭ el subteraĵo demandis Petro.

— Mi meditas, Siro, — trankvile respondis Golicin.

Jakimĉjo Voronin ekstaris, ŝanceliĝante foriris en arbustojn por venki sian naŭzon. Neniu ekridis al lia dorso, neniu eligis eĉ unu vorton. Nur Ĉemodanov flustris:

— Ho, mia morto...

2. Vi konstruos ŝipojn!

Pli ol cent verstojn de Moskvo ĝis Perejaslavlo-Zalesskij la cara ŝipa trajno trairis dum du tagnoktoj. Apud komerca vilaĝeto Rostokino multaj ĉaroj fiksiĝis en koto, estis decidite ne atendi ilin. Petro, malpacience insultante, urĝadis la veturigistojn, por veni al la lago ĝis vespero. Ĝuste tiel fariĝis — antaŭ la nokto la homoj falis dormi ĉe la bordo mem, la malfacila vojo kaj sufoka varmego dormigis eĉ la plej eltenemajn.

Ĉe mateniĝo Petro, ŝveliĝinta pro fortaj kulaj pikoj, ordonis tamburi alarmon. La ludsoldatoj, kvazaŭ ne estus la tamburado, muĝado de klarionoj, plu dolĉe dormis sur la rosa herbo. Servistoj vekadis siajn sinjorojn, tiradis iliajn piedojn, verŝadis

lagan akvon en la vizaĝojn.

— Ho, patro nia, kiom vi estas malpacienca! — riproĉis Golicin Petron.

Petro ne respondis, nur kraĉis malproksime flanken. Super la apenaŭ plaŭdanta lago staris nebulo, en kvieta, varma aero de la komenciĝanta tago zumis kuloj...

El la arbaro plu estis trenantaj sin postiĝintaj ĉaroj kun traboj, ligno, segitaj tabuloj, rompita ŝtono. Ligitaj ĉevaloj de la ludsoldatoj estis ronkantaj sur la herbejo...

— Konstrui floton sur la lago restos Apraksin kun Ievlev! — diris Petro, alirante al la caraj tablestroj kaj la ludsoldatoj, inter kiuj ĉe la akvo mem staris Golicin, la maljuna Timmerman, Apraksin kaj la holandaj majstroj Koort kaj Karsten Brandt. — Konstrui floton, kaj por tio — ŝipkonstruejon. Konstrui ankoraŭ sur fostoj, kiel antaŭ nelonge ni pensis, varfon konvenan por ŝipoj. Ankoraŭ konstrui baterion sur la kabo Gremjaĉij. Kaj vi, Voronin, instruos por la floto matrosojn...

Jakimĉjo Voronin palpebrumis, Ievlev kun Apraksin nerimarkeble interrigardis. Boriso Aleksejeviĉ Golicin silente rigardis al la kvieta lago, kvazaŭ vidis tie kaj floton, kaj baterion sur la bordo, kaj la ŝipkonstruejon. La vizaĝo de Timmerman estis timigita.

La pafistoj, la rajdistoj kaj la veturigistoj, lavinte sin kaj siajn vestaĵojn en la lago, foriris al Moskvo. Petro Aleksejeviĉ gastis nur dum kelkaj tagoj, penis kun Timmerman kaj la holandanoj ripari malnovan jaĥton, sed ne atinginte rezulton, forrajdis kun Golicin, Menŝikov, Izmajlov hejmen — komandi

surterajn ludajn batalojn.

Baldaŭ la caro sendis kampulojn por enbati fostojn, konstrui varfon, ĉarpenti arbotrunkojn por estontaj ŝipoj. Estro super la kampuloj ne estis; kia estos varfo, neniu sciis ĝuste; kiaj traboj necesas por ŝipoj kaj kiaj estos ŝipoj, eĉ Franco Teodoroviĉ Timmerman ne povis diri. Por Apraksin, Ievlev, Voronin kaj Ĉemodanov kun la holandaj maljunuloj la vilaĝaj ĉarpentistoj konstruis kabanon: du glimaj fenestretoj, tera planko, forneto. Samloke ili kuiradis en gispoto kion ajn — brasiksupon kun ŝinko, fiŝsupon, fritadis lagajn fiŝojn...

La alpelitaj kampuloj — nenutritaj, koleraj, deŝiritaj de sia propra afero por nesciate kia kaŭzo, pikitaj de kuloj — kutimiĝis iradi en vilaĝeton Veskovon — por nutri sin per tio, kion ili sukcesos akiri.

Timmerman kun siaj maljunuloj — Karsten Brandt kaj Koort — ĉiuvespere longe konversaciadis, skribadis sur ardezo, desegnadis, sed nenion bonan sukcesis desegni. En sabata vespero, kiam Ievlev kun Apraksin revenis el banejo de Veskovo, Franco Teodoroviĉ konfesis, ke la ŝipkonstruejon desegni li ne povas, ĉar tiun aferon li ne scias. La maljunuloj Brandt kaj Koort kapjesis — jes, jes, ni ne povas, ne scias, antaŭe sciis, sed nun forgesis, kaj ankaŭ estas malfacile konstrui ŝipkonstruejon ĉi tie.

— Kial tiel? — demandis Apraksin. — Pipojn fumi vi scias kaj nin instruas, sed ŝipkonstruejon forgesis...

Silvestro Petroviĉ eksidis sur la benkon, enpensiĝis. Apraksin estis paŝanta tra la domo — de la tablo al la angulo, de la angulo al la tablo. Jakimo Voronin estis ronĝanta la ungojn, suspiranta.

— Ĉu ne okazos tiel, ke Petro Aleksejeviĉ tiun ĉi amuzon subite forgesos? — demandis li nelaŭte.

Ievlev same nelaŭte respondis:

— Sed ĉu tio por vi estos ĝojo, Jakimo? Ĉu ni ne parolis pri tio, kiaj bravaj maristoj ni estos post paso de tempo? Aŭ ni ne vidis en nia imago fregatojn kaj galerojn? Ĉu vi forgesis?

Juna nobelido Baĉjo Rĵevskij desaltis de sur la forno, surĵetis kaftanon sur siajn frostosentemajn ŝultrojn, diris grumble:

— Tio estas afero ne nia — la floto. Patro mia ĝuste tiel al mi diris. Floto estas afero fremdlanda. Ne estis tio ĉe niaj patroj, kaj ni tion ne bezonas. Varfo sur fostoj! Ja kia tia varfo, de kie ĝi falis sur nian kapon? Ŝipkonstruejo, kanonoj sur lago...

— Ĉu vi ne satdormis? — malmilde demandis Apraksin. — Iru, ĝisdormu. Tie, eble, estas pli varme, sur la forno... Iru, iru, Bazilo Andrejeviĉ, tro babilema vi iĝis, kiel mi vidas...

Rĵevskij, timiĝinte, ke li diris troaĵon, tuj komencis elturniĝi:

— Dio estu kun vi, Teodoro Matejeviĉ, kion mi scias? Mi ĵus alveturis, estas juna, malsaĝa...

— Do, sidu sur la forno...

Bazilo ĉirkaŭvolvis sin pli dense, ĵetis el sub la frunto rigardon al Apraksin, metis blondan kreskintan tufon sur la orelon. Prudente ekparolis Franco Teodoroviĉ Timmerman:

— Necesas konstrui la ŝipon, ĉar sinjoro Peter povas tute ne aprobi nin, se ni al li ne konstruos fregaton. La baterio sur kabo

Gremjaĉij — tio estas bona. Sonhorloĝo — same estas bona. Kaj ankaŭ la varfon ni konstruos, — tio estas afero ne komplika, ni konstruos simple, sen ajnaj artifikoj. Sed se, sinjoroj, deziras ni komplezi nian Siron, tiam endas al ni fari tion, por kio pafados la luda baterio, por kio iros la sonhorloĝo, por kio staros nia malgranda varfo. Necesas konstrui kun tuta eleganteco kaj inĝenieco malgrandan ludan, gajan ŝipeton. Ĉu prave?

Teodoro Matejeviĉ demetis de la kandelo la karbiĝintan pinton de la meĉo, ĵetis atentan rigardon al Timmerman.

— Sed se tiu amuzo iĝos ne amuzo? Ne vidas mi, Franco Teodoroviĉ, kaŭzon, por nur komplezi al Petro Aleksejeviĉ, anstataŭ mem cerbumi iomete. La Siro ne aĝas ankoraŭ dek ok jarojn, multaj el ni aĝas multe pli. Kaj ne servutuloj ni estas por li, sed bonaj konsilantoj...

En la kabano estiĝis silento. Timmerman kvazaŭ kun miro estis rigardanta al Teodoro Matejeviĉ. Jakimo ree komencis ronĝi la ungojn. Nur sola Ĉemodanov, nenion kompreninte, ekparolis konsole:

— Amikoj, amikoj, por kio ni pri ne nia afero cerbumu? Kion al ni nia Siro ordonis, tion ni faros kun tuta diligento, kaj ĉu por amuzo aŭ ne por amuzo — tio nin ne koncernas. Urĝe necesas konstrui la varfon, kaj la ŝipkonstruejon, kaj la ŝipon, kaj tian ŝipon, ke ĝi ne dronu, savu Dio, sed navigu, kaj bonorde, kun velo kaj rigilaro, kaj ke kanono sur ĝi pafu. La rotestro[23], kvankam estas en Moskvo, nur pri la mara metio pensas; endas al ni fari, kion ni povas. Se ni ne sukcesos — ni responsos, povas fali en malfavoron. Kaj se sukcesos — iros

23 La rotestro — t. e. Petro I (lia rango en la ludarmeo). *(trad.)*

nia ŝipo kun pafado sur la lago, kaj kun laŭta pafado. Siro rotestro ege ŝatas, ke kanono laŭte pafu...

Ievlev interkaptis rigardon de Apraksin: strabe, kun kaŝita moko rigardis Teodoro Matejeviĉ al Ĉemodanov. Kaj kuŝiĝante por dormo, nelaŭte diris:

— Odoraĉas niaj amikoj! Abomene esti kun ili. Alian penson en la kapo ili ne havas, krom nur kiel komplezi kaj flati...

— Junaj ankoraŭ! — pacige respondis Silvestro Petroviĉ.

— Por io junaj, sed por io maljunaj: kiel la manon al Petro Aleksejeviĉ kisi aŭ riverenci ĝis la tero — pri tio ili estas majstroj... Baĉjon Rĵevskij-on prenu por ekzemplo.

— Ne en bona vi estas humoro hodiaŭ...

Apraksin kolere silentis. Sur la muroj kun susuro estis irantaj blatoj. Pluvo senĉese tamburadis al la glimaj fenestretoj. Egale, trankvile, kvazaŭ post plenumita malfacila laboro, estis ronkantaj la holandaj kvietaj maljunuloj. Ievlev flustre vokis:

— Ĉu vi dormas, Teodoro Matejeviĉ?

— Ne dormas. Kia povas esti dormo...

— Estas libroj bonaj, de la oĉjo mi aŭdis, se ni povus ilin akiri: pri konstruado ŝipa, pri navigacio, iuj glorindaj viroj tiujn librojn skribis...

Teodoro Matejeviĉ ne respondis, iom poste suspiris:

— Akiri multon necesas...

Poste, en malfrua nokto, Ievlev estis arde parolanta:

— Mia oĉjo, viro de alta saĝo, estro de la Ambasada

Kancelario[24] Poluektov Rodiono Kirilovi̯ĉ, antaŭ nelonge, kiam mi estis en Moskvo, dubis pri nia ŝipkonstruejo kaj rakontis, kiel estis, kiam Ordin-Naŝĉokin en Dedinovo «Aglon» konstruis: feron neniu fabrikanto donis, la Kanona Kancelario puliojn ne povis fari, kaj kiam forĝisto iĝis necesa, tiam oni skribis leteron — kvazaŭ estas unu metiisto, sed eĉ tiu ne estas, ĉar estis al li ordonite forĝi langon por granda sonorilo de la Endormiĝo de la Dipatrino.

Apraksin ekridis en mallumo:

— Ĉu en tuta Rusujo ili ne povis trovi forĝiston?

— Sed por kio al ili, Teodoro Matejevi̯ĉ, sian postaĵon malkvietigi? — en malgajo ekkriis Ievlev. — Ĝuste sur tio Bazilo Baziljevi̯ĉ princo Golicin sidas: tiel estis, tiel estas, kaj tiel estu plu.

Teodoro Matejevi̯ĉ enpensiĝis, poste demandis:

— Kiel vi supozas, Silvestro, por kio Naŝĉokin la ŝipojn konstruis?

Ievlev ne respondis.

— Vi povus pridemandi Poluektov-on, li dum kiom da jaroj kronikojn legadas... Kaj kiam vi estos en Moskvo — iru en la Kancelarion, eble, tie ankaŭ desegnoj estas, kiel ŝipojn konstrui, kian ili rigilaron bezonas, kiel varfon fari.

Matene, ankoraŭ antaŭ sunleviĝo, Ievlev vekis Francon Teodorovi̯ĉ-on. Tiu levis de leda kuseno sian ĉifitan de la

24 Kancelario: originale «Приказ» (esperantigebla kiel «Prikazo»), t.e. laŭvorte «ordonejo» — administra organo en Rusio ĝis la epoko de Petro I, ekvivalenta al ministrejo aŭ departemento. La tradukinto preferis ne enkonduki novan ekzotan vorton, sed traduki per konata vorto «Kancelario». *(trad.)*

dormo vizaĝon, reĝustigis sur la kalva kapo noktoĉapon kun kvasto. Silvestro Petroviĉ diris malmilde:

— Sufiĉas dormi, sinjoro majstro. Ni scias malmulte, vi scias pli multe! Kaj tagoj pasas sen utilo. Ekstaru kaj prenu grifelon, ni lernos!

Timmerman rapide leviĝis, lavis sin, eksidis al la tablo. Apraksin, Ievlev, Lukov kun severaj vizaĝoj estis atendantaj. Franco Teodoroviĉ alŝovis al si la ardeztabulon, tusis, enpensiĝis, ankoraŭ tusis.

— Jen kio! — diris Apraksin. — Vi, Franco Teodoroviĉ, komplezu nin, rememoru, kion vi mem en la pasintaj jaroj lernis. Sidu hodiaŭ kaj morgaŭ — rememoru. Ni ne ŝercojn ŝerci bezonas, sed aferon fari. Hodiaŭ estas mardo, ĵaŭde ni al tiu ĉi tablo eksidos, kaj tiam ne tusu.

Tage oni alpelis katenitojn. Unu el ili — alta, maldika, kun ĉapo da krispaj grizaj haroj, kun barbo — longe rigardis, kiel laboras pri la ŝipkonstruejo Ievlev kun Apraksin, poste kriis al Silvestro Petroviĉ:

— He, sinjoro, alvenu! Mi mem ne povas, la piedoj tro laciĝis...

Silvestro Petroviĉ svinge enbatis la hakilon en trabon, aliris al la katenito. Tiu estis sidanta sur holmeto, rigardanta per severa rigardo de la profunde enkaviĝintaj okuloj.

— Kion vi konstruas?

— Ŝipkonstruejon ni konstruas! — malafable respondis Ievlev.

— Kiu do ĝin tiel konstruas? Vi alpelis homamason, sed

tute senutile. La kavoj ja por kio estis elfositaj? Jen kio: iru vi en la urbon Arĥanĝelan, kiu estas ĉe Dvino apud la Blanka maro. La Arĥanĝela urbego estas de la tuta maro pordego. Tie majstron serĉu, spertulon, lertulon...

— Ĉu vi el tie devenas?

— Kial el tie? Mi estas el ĉi tie, sed estis tie, la maron-oceanon vidis. Konstruas oni ŝipojn kaj en Arĥangelsko, kaj en Kemo, kaj en la tuta Blankmario.

— Kaj ĉu vi mem en tiu afero komprenas?

La katenito respondis morne:

— Mia afero estas morti...

Kaj forturniĝis — rigardi al la kvieta malvarma aŭtuna lago.

Nokte antaŭ dimanĉo pli ol cent kampuloj, alpelitaj por konstruado de la ŝipkonstruejo, la varfo kaj ŝipoj, — foriris. Kun ili fuĝis ankaŭ la katenitoj — ĉirkaŭ dek homoj. Fostojn oni enbatadis nun pli malofte, trabojn ĉarpentadis malpli vigle. Bruadis longaj sombraj pluvoj. Timmerman, mem rememorante tion, kion iam lernis, instruadis matematikon al Apraksin, Ievlev kaj Lukov. Rĵevskij kaj Voronin kategorie rifuzis lerni, diris, ke ne tiom malriĉas iliaj bienoj, por ke ili laborigu iliajn kapojn...

En la somera tago de Kosmaso kaj Damiano[25] ĉiuj laboroj sur la lago haltis. La kampuloj dum kvara tago ne estis ricevantaj panon. Ne estis kion kuiri, la homoj silente kuŝis en humidaj terkabanoj, iuj fosadis en la arbaroj radikojn, aliaj almozpetadis pro Kristo en Veskovo. Vole-nevole necesis forlasi la konstruatan ŝipkonstruejon kaj veturi en Moskvon.

25 La 1-a de julio laŭ la Julia kalendaro. *(trad.)*

Kancelariestro Pafnutio Ĉerdincev, skrapante sian barbon per la ungoj, komencis enuige paroli al Apraksin kaj Ievlev, ke la amuzoj sur la lago ege multe kostas por la fisko, ke estas ordono ne plu doni nutran monon, kaj se la princo-gardanto diros, tiam li, kancelariestro, certe subskribos la etaton.

Ievlev, perdante sinregadon, kriis, ke Bazilo Baziljeviĉ Golicin al la granda monarĥo ne donis kanonojn, tio estas sciata de la kancelariestro, kaj tial li denove sendas ilin al Golicin. La kancelariestro humile silentis, atendante, ĝis la veninto de la lago ĉesos koleri. Paroli kun li ne havis sencon. «De Sofia[26]! — decidis Ievlev. — Por ŝi li staras! Do, ni memoros!»

En Moskvo kaj en la Furaĝa, kaj en la Nutra, kaj en la Grena kancelarioj oni donis nenion sen ordono de la princo-gardanto. Ievlev kaj Apraksin ree enseliĝis. Dum tuta tago ili serĉis la caron — li estis nek en Kolomenskoje, nek en Vorobjovo, nek en Preobraĵenskoje. Ili malsekiĝis, malsatiĝis, lacigis la ĉevalojn kaj nur antaŭ nokto trovis Petron Aleksejeviĉ-on en la

26 Sofia Aleksejevna (1657–1704) — rusa caridino, en 1682–1689 regento de Rusio. Bazilo Golicin estis ŝia favorato. En 1689 Petro I, ŝia frato, aĝis 17 jarojn kaj povis jam surtroniĝi, tamen Sofia plu tenadis en siaj manoj la potencon. Inter Petro kaj Sofia ekzistis strečita malamikeco kaj malfido. Post multaj konfliktoj (inklude atencon kontraŭ Petro) Sofia estis forigita de la potenco fare de Petro kaj ekzilita en monaĥinejon. *(trad.)*

germana kvartalo[27] — en Kukujo, en la domo de Lefort[28].

La caro sidis en malaltplanka pura varma saloneto kun multegaj speguloj, per ŝraŭbilo malboltante germanan mallongtuban muskedon kun malpeza fusto, garnita per arĝento. Lefort, en puntaĵoj, afable, kun riverenco petis la venintojn eksidi, ripozi, esti gastoj en lia modesta domo, prokrasti la aferojn por morgaŭ. Sed nek Apraksin, nek Ievlev eksidis. Per du raŭkaj gorĝoj, interrompante unu la alian, ili ekparolis, ke tiel ne povas daŭri plu — aŭ konstrui ŝipojn en Perejaslavlo-Zalesskij, aŭ forlasi tiun ideon kaj ne malŝpari la tempon vane.

Petro kuntiris la rondajn brovojn, forte kunpremis la malgrandan knaban buŝon, ne trafante en la manikojn, longe surmetadis la kaftanon. Lefort kun kandelingo en la mano iris elakompani lin, konsole premis la kubuton de Petro, diris, ke eĉ ĝis la mateno li tamen atendos lian caran moŝton por vespermanĝo.

— Atendu! — ordonis Petro.

Kiam ili estis eksidantaj sur la ronketantajn sub pluvego ĉevalojn, en la malsekajn selojn, subite ili domaĝis pri la varmaj lumoj de la Leforta domo, domaĝis, ke ili ne manĝis tie varman manĝaĵon, ne varmigis sin...

---

27 La germana kvartalo — kvartalo en Moskvo, en kiu loĝis diversnaciaj eŭropanoj (la rusa vorto «немец» krom «germano» signifis ankaŭ «mutulo», t. e. nescianto de la rusa lingvo). Ekde 1652 tiu kvartalo situis ĉe rivereto Kukujo (kaj ankaŭ alia nomo de la kvartalo same estis Kukujo), ekster la limo de la urbo. En la 18-a jarcento la kvartalo iom post iom perdis sian karakteron. Ekde la 19-a jarcento ĝia teritorio nomiĝas Lefortovo (vd. sube pri F. Lefort). *(trad.)*

28 Franz Lefort (François Le Fort) (1656–1699) — rusia ŝtata aganto de ĝeneva deveno, proksima helpanto kaj konsilanto de caro Petro I. *(trad.)*

Silente, vipante la ĉevalon per tatara skurĝo, Petro Aleksejeviĉ pelis ĝin al Kitaj-urbo, al la Kitaja muro[29], kie apud la Koncipa preĝejo loĝis en sia domo la kancelariestro Ĉerdincev. Jam en la urbo, reteninte la ĉevalon, Petro atendis Apraksin-on kaj Ievlev-on, demandis, kio estas sur la lago. Teodoro Matejeviĉ rakontis ĉion senkaŝe, kiel ĉiam — rekte kaj trankvile. Ievlev rakontis pri Arĥangelsko, ke onidire estas tie bonaj majstroj de ŝipa metio. Petro vigle turniĝis al Silvestro Petroviĉ, demandis:

— Ĉu vere?

Kaj aldonis:

— Eksciu ĝuste, se estas tiel — veturu tien por majstroj. Veturigu ilin al la lago...

La kancelariestro Ĉerdincev, enferminte sin per ĉiuj rigliloj, sub bojado kaj graŭlado de ĉenhundoj, estis ludanta kun gastoj malpermesitan ludon — ĵetkubojn, kiam al la pordego ekfrapis la caro Petro Aleksejeviĉ. La ludo estis tuj kaŝita, la kancelariestro ĵetiĝis sur benkon — ŝajnigi sin malsana, sed la caro per piedbato faligis la benkon kaj ektrenis Ĉerdincev-on en la Kancelarion, piedbatante lin per la boto kaj farante punon dum irado. Freneziĝinte pro teruro, kvazaŭ mutiĝis la kancelariestra edzino, eĉ forgesis doni al Pafnutio ĉapon. La kancelariestro, ne kutimiĝinta al batoj, tuj konfesis sian timon antaŭ la princo-gardanto Golicin kaj denuncis aliajn kancelariestrojn — kaj de la Grena, kaj de la Furaĝa. Petro iris pluen kun Apraksin, kaj Ievlev-on lasis kun Ĉerdincev — skribi etatojn por la lago.

---

29 Kitaj-urbo — historia distrikto de Moskvo interne de Kitaja fortikaĵa muro, alkonstruita al la Moskva Kremlo. *(trad.)*

Dum la tuta longa nokto Pafnutio almetadis al la ŝveliĝinta fizionomio krenan raspaĵon, kalkuladis ŝovelilojn, sitelojn kaj barelojn[30] — pizojn, farunon, buteron, grion, oĥadis kaj ĉe la mateniĝo sendis al la lago ĉaran trajnon.

— Sed oni diradis — ili havas amuzon ĉe Perejaslavlo, — diris la kancelariestro, elakompanante Silvestron Petroviĉ-on. — Bona amuzo — se ili per tiaj trajnoj voras...

— Vi, Pafnutio Nikitiĉ, por la fisko pli multe kostas! — rimarkis Ievlev. — Tre pli multe...

— Sed ja anstataŭe kia kapo! — memkontente konsentis la kancelariestro. — Min eblas eĉ torturi, eĉ tranĉi, eĉ per fajro bruligi, eĉ sur pendigilon pendigi — ne malkovriĝos eĉ tiom...

Kaj li montris per la ungo, kiom ne malkovriĝos.

— Mi estas saĝa, pro tio oni min tenas!

3. Oĉjo kaj Manjo

Ne ferminta la okulojn dum la tuta hodiaŭa nokto, Ievlev enpensiĝis — kie li dormu almenaŭ dum horo, kaj tuj decidis: mi veturos al oĉjo Poluektov — tie oni ĉiam ĝojas pri mi. Kaj ne estis alia loko, kien eblus veturi: la patrino antaŭlonge mortis, la patro strangumas en fora vilaĝeto. Al riĉuloj el amikoj-ludsoldatoj li ne deziris iri. Ĉu li, ne alta nobelo, konvenas al pompaj palacoj? Kaj tutegale ili estas amikoj, nur kiam ili estas en la ludarmeo, sed hejme — ĉu ili estos amikoj? Tie estas propra vivo...

30 Ŝovelilo, sitelo, barelo — malnovaj mezurunuoj de volumeno de ŝutaĵoj kaj likvaĵoj. Ŝovelilo — ĉirkaŭ 5 litroj; sitelo — ĉirkaŭ 12 litroj; barelo — ĉirkaŭ 500 litroj (tamen ekzistis variaĵoj). *(trad.)*

Ekdormetante dum rajdado, pensante pri tio, kion necesas demandi de la oĉjo, li veturadis malrapide en denseco de kurbaj Moskvaj stratetoj, ĝis kiam al li levis kaprompilon forta knabego, ĝis kiam ekkriis al li feraj gorĝoj: for, gardu vin, jen knuto!

La ĉevalo baŭmis, ĵetiĝis flanken. Pretere, en Kremlon, por pensi siajn bojarajn pensojn, estis veturantaj bojaroj, iu rajde, iu en kaleŝo, korpulentaj, barbaj, ĉiuj kun gardistaro, kaj la gardistaro — iuj kun halebardoj, iuj kun glavoj, iuj kun lancoj. Ili hastis, batadis timbalojn, dispeladis la popolon per knutoj, sed por kio ili hastis?

Ievlev, trankviligante la ĉevalon per la polmo, subridis: ili hastis atendi en vestiblo, kvereli ĉe la ĉambelana perono, denunci, fanfaroni, flati al la mensdebila Johano[31], krucosignadi sin en timo, kiam preterirante tondros per la botoj Petro Aleksejeviĉ...

Apud la Preseja korto Ievlev saltis sur trabon, metitan ĉe la pordego, malfermis la barilpordon, interparolante kun kaduka maljuna pordisto, mem donis al la ĉevalo manĝaĵon, lavis la manojn ĉe la puto, eniris en la puran vestiblon de la onkla duloĝeja domo. La koro por mallonga tempo ekbatis, ŝvito aperis sur la frunto, sed Silvestro Petroviĉ hontigis sin, vigliĝis, eniris en la ĉambrojn, ĉirkaŭmetitajn per floroj en potoj kaj potetoj, kun plankoj, kovritaj per tapiŝoj, kvietajn, helajn...

31 Johano (Ivano) la V-a (1666–1696) — rusa caro en 1682–1696, pli aĝa frato de Petro la I-a. Ekde la infaneco li estis malsanema kaj nekapabla al regado de la lando; oni asertadis, ke li estis mensdebila. Petro estis tro juna, sed Ivanon subtenadis caridino Sofia, kaj rezulte estis decidite fari ambaŭ fratojn caroj, kaj Sofia-n — regento. Ĝis 1689 kaj Ivano kaj Petro estis caroj nur formale, fakte la potenco apartenis al caridino Sofia. *(trad.)*

Rodiono Kirilovi͡c sidis en malalta foteleto ĉe larĝa glima fenestro, legis dikan libron kun bukoj. Ekvidinte la enirinton, li demandis per tremanta maljunula voĉo:

— Kiun Dio sendis? Venu pli proksime?

Ievlev nomis sin, la koro ree ekbatis — tuj elkuros ŝi. Sed ŝi ne venis. La maljunulo, kaptinte lambastoneton, ete paŝante per la malfortaj kruroj, eklamis renkonten, brakumis kaj longe kun kareso rigardis la krudan pro vento, grizan pro laco ankoraŭ junan vizaĝon.

— Silvestreto! Sendis Dio ĝojon...

Kaj li ekklopodis:

— La kaftanon for! Vi malvarmumos, ekfebros! Per seka vesto transvestiĝu. Manjo, kien vi malaperis, kuru tuj, portu sekan vestaĵon...

Maria Nikiti͡cna, la adoptita filino de la onklo, orfino — ŝiaj parencoj forbrulis kune kun la domo en la Blanka urbo dum la somera incendio, — ruĝiĝinte tuta, eĉ ne riverencinte al Silvestro Petrovi͡c, alportis sekan onklan veston — senkoluman kaftanon kun pelta bordero, marokenajn kudritajn ŝuojn kun fleksitaj pintoj, subvestaĵojn, oĥis, forkuris. Ievlev staris senmove — kiom bela iĝis la adopta fratino. La oĉjo ĵetis al li rigardon, akompanis Manjon per la okuloj, suspiris, diris:

— Iras, iras tempo, jen ankaŭ Manjo iĝis svatebla...

— Ĉu oni svatiĝas? — demandis Ievlev kaj ektimis tion, ke li demandis.

Rodiono Kirilovi͡c balancis la kapon:

— Kiu svatiĝos al orfino? Se mi estus ri͡ca, sed vi ja mem

scias, ke tuta mia riĉo estas nur tiu ĉi fatraso en la domo...

Li parolis, kaj la okuloj rigardis atente, kvazaŭ esplorante.

Transvestinte sin, Ievlev eksidis sur la benkon, ridetis subite al la tuta aspekto de la oĉjo, al konataj kaj ŝatataj de la infaneco odoroj de herboj, kiuj faske pendis en la loĝoĉambroj, al libroj kaj folioj de manuskriptoj, kiuj kuŝis ĉie, al gaja kantado de lanuga flava birdeto, kiu estis saltanta en kaĝo sur la fenestro. En la animon venis kvieto, facilo, kiel ĉiam estadis en la onkla domo. Kaj ĉarme, gaje frapetadis supre la malpezaj piedoj de Manjo.

— Nu? — demandis la onklo. — Al kio vi ĝojas, ŝipisto? Jen, li sidas kaj tuta lumas! Ĉu vi konstruis ŝipon?

— Ne konstruis.

— Kion do faras viaj holandanoj?

— Ne povas ili, oĉjo. Ili ja de longe nenion konstruadis. Ili estis matrosoj, poste antaŭ dudek jaroj «Aglon» por caro Aleksio konstruis, sed kiu faris desegnaĵojn, nun jam ne eblas ekscii. Ili ambaŭ, kaj Koort kaj Brandt, tre malprogresis, tiom da jaroj okupiĝadis ne pri sia metio, faradis ĉiajn bagatelojn: tenajlojn por forigi karbiĝintajn kandelmeĉojn, ledajn kirasojn, butonojn, sabringojn, bukojn por ŝuoj...

Rodiono Kirilovič aŭskultadis, glatumadis per la blankaj, maldikaj fingroj la maldensan barbon, poste subite vigliĝis:

— Sed kial vi, karulo, kvazaŭ defendas viajn maljunulojn. Ĉu mi ilin juĝas? Ne en ili ja estas la afero, ne en la maljunuloj. Ĉu la varfon vi konstruis?

Ievlev diris, ke ne, ne konstruis.

— Kaj la ŝipkonstruejon?

— Ni konstruas, oĉjo. La afero estas nova, senekzempla...

— Senekzempla, vi diras?

— Senekzempla, oĉjo...

— A ha... nu, se senekzempla — do senekzempla...

La maljunulo estis mistere ridetanta, rigardanta en la okulojn de la nevo, fojfoje fingrumadis malnovan malhelsukcenan rozarion. Manjo estis portanta desupre glasojn, stanajn botelojn, telerojn, tukojn por viŝi la manojn. Bonguste odoris rostita bovaĵo, urogalo, kiu estis surtabligata ĉi tie en nigra saŭco kun prunoj. Ievlev parolis malklare, dise-mise, plie aŭskultadis paŝojn de Manjo, ol tion, kion respondadis al li Rodiono Kiriloviĉ. Poste li subite pensis: «Ĉu vere ŝi riverencos kaj foriros! Kaj kia stulta moro — tagmanĝi malkune!»

Sed la onklo, kvazaŭ legante liajn pensojn, ordonis al Manjo eksidi ĉi tie — kun ili. La okuloj de Maria Nikitiĉna gaje ekbrilis.

Dum la tagmanĝo Silvestro Petroviĉ rememoris la komision de Apraksin, demandis, kiel eblas serĉi en la Kancelario, aŭ kie la oĉjo proponos, desegnaĵojn por la ŝipoj, kiuj estis konstruataj sur Dvino kaj Volgo.

— Ni serĉos! — respondis la onklo, verŝante por si kaj por la nevo francan vinon en malnovajn pezajn kalikojn. Li faris unu gluton, pensis iomete, poste ekparolis, subridetante: — Freneza ulo, serbo Križanić[32] ne sen vero skribis: —

32 Juraj Križanić (1618–1683) — kroata teologo, filozofo, verkisto, lingvisto, historiisto, publicisto, kiu elpaŝadis por unueco de la slavaj

«ksenomanio», ĉu vi memoras? Aŭ vi ne aŭdis pri tia serbo? Multe da galimatio eliris el lia plumo, sed iuj pensoj memorfiksiĝis al mi por longe; ksenomanio aŭ stulteco, pro kiu alilandanoj super ni dominas, trompas nin ĉiel kaj faras el nia popolo kion ili deziras — jen kiel la serbo skribis. Pro siaj frenezaj rezonadoj finis la serbo sian vivon en Siberio, sed lian vorton «ksenomanio» vi memoru, neveto...

Rodiono Kirilovi ĉ subridis:

— Ŝipkonstruejo por vi estas afero nova, senekzempla. Ŝipo — entute ne ekzistinta. La boato, kiun caro Petro Aleksejevi ĉ en staplo en la Lina korto trovis kaj sur rivereton Jaŭzon surakvigis, same estis afero nova, neaŭdita, nevidita. Ĉu tiel?

Silvestro Petrovi ĉ respondis:

— Certe, ne malnova!

— Jen, «certe»! Sed ne scias vi, infano, ke tia novaĵo estas ne pli ol forte forgesita malnovaĵo, — jam ne ridetante, en kolero diris la onklo. — Forgesi nian propran bonon — pri tio ni lertas, sed memori — tio apenaŭ troveblas. Ne scias ni nun, ke multo okazis en Rusujo, okazis kaj pasis, kaj forgesiĝis. Atendu, jen hodiaŭ vi ripozos, kaj morgaŭ mi kondukos vin en la Kancelarion, metos antaŭ viajn okulojn librojn kaj manuskriptojn, — vi aĥos! Kaj multon, infano, malkovros al vi

popoloj. Li venis en Moskvon en 1659, en 1661 pro subteno de grekkatolikismo li estis ekzilita en Siberion, kie li skribis siajn ĉefajn verkojn. En 1676 li estis absolvita, revenis en Moskvon, poste loĝis en Polio. La vorto «ksenomanio» (t.e. servileco antaŭ fremduloj), originale «чужебесие», estis kreita de li en kadroj de lia projekto de artefarita interslava lingvo. La persono de la romano donas ne tute ĝustajn informojn pri li («serbo», «mortis en Siberio»), ĉar en tiama Rusio oni ne distingis serbojn kaj kroatojn, kaj la sorto de Križanić ne estis vaste konata. *(trad.)*

la kronikoj kaj analoj...

Manjo levis la maldikajn brovojn, kunmetis la manojn sur la alta brusto, penante kompreni, pri kio parolas la onklo, ŝiaj okuloj jen ekbriladis, jen estingiĝadis...

Per malgrandaj glutoj trinketante la francan vinon, rigardante antaŭ si per koncentrita rigardo, la kancelariestro voĉlegis el la memoro:

— «En la jaro ses mil kvarcent kvardek naŭa[33] iris Igoro kontraŭ la grekoj, kiam sendis la bulgaroj sciigon al la caro, ke iras rusoj al Konstantinopolo sur skedioj dek mil». Ske-dioj!

Kaj demandis:

— Kaj kion en la Nestora kroniko signifas «skedio»? Ĉu vi scias?

— Skedioj estas barkoj de antikvaj rusoj!

— Jene, de antikvaj rusoj. Vi pripensu — dek mil skedioj! Floto! Kaj kia floto! Hastings — mara reĝo, tiu, kiu kondukadis normanajn armeojn, ĉu havis tiom potencan floton, kiel niaj prauloj? Ne havis Hastings tian floton. Kaj vi diras — nova afero estas ŝipkonstruejo, senekzempla! Ŝipo — eĉ tute neaŭdita! La tataro detruis nian vivon — ekstaris per siaj ĉevalaj regimentoj inter ni kaj la maro, kiel muro ekstaris, sed estis tio, kaj kiel estis. Kaj ne nur estis, sed estas, estas, nevo. Necesas trovi, kie ŝprucas tiuj fontoj vivodonaj...

La kandeloj estis mallaŭte kraketantaj, flava vakso estis ĉirkaŭverŝanta la kuprajn, malheliĝintajn pro tempo kandelingojn. Maria Nikitiĉna subite levis la rigardon,

33 En Rusio ĝis la jaro 1700 estis uzata jarkalkulo «de la mondokreo». *(trad.)*

renkontiĝis per la okuloj kun Silvestro Petroviĉ, ruĝiĝis ĝis la harradikoj. Ievlev same ruĝiĝis nesciate pro kio. Trans la fenestroj, trans la dense fermitaj ŝutroj gardistoj frapadis al feraj tabuloj, markante horojn. Rodiono Kirilloviĉ, subridante pri siaj pensoj, estis diranta:

— Vi, nevo, ne pensu, ke via oĉjo sendas vin serĉi maristojn en la antaŭlonge forpasintajn tempojn. Pri tiuj tempoj estos aparta konversacio. Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj havis mi okazon esti en la urbo Arĥanĝela, vidis mi la Terskan bordon, la Vintran, en Kola mi estis, sur insuloj Solovkiaj, en Kemo. Por tio mi al vi pri la antikvaj kronikoj nun rakontas. Kiu serĉas, tiu trovos. Laborantoj de la mara metio, veraj maristoj, posteuloj de la plej gloraj novgorodanoj, kuraĝaj, fortaj, saĝaj — estas tie. Se vi decidis maran amuzon fari — faru laŭ via deziro, sed tamen tio povas iĝi ne amuzo. Kaj se tiel — serĉu en la Nordo tiujn homojn, de kiuj vi povas lerni verajn marajn artojn...

— Ĉu en Arĥangelsko serĉi? — demandis Ievlev.

— Tie, nevo.. Pri la Nordo pensu tage kaj nokte, tie homojn serĉu, pri tio rakontu al la Siro. Morgaŭ vi en la Kancelario rigardos, kiel rusaj homoj iradis al Mangazeo[34], kaj samtempe vi vidos, kiel ŝafkapuloj por tiuj kuraĝuloj la vojon fermis. Multon mi al vi montros, kaj nun tempas dormi, laciĝis vi...

Kuŝigante la nevon kaj metante ĉe li por nokto mentan kvason, la onklo subite demandis:

— Andreon Jakovleviĉ-on princon Ĥilkov-on ĉu vi konas?

— Ne konas, oĉjo.

---

34 Mangazeo — la unua rusa arkta urbo de la 17-a jarcento en Siberio. *(trad.)*

— Morgaŭ mi vin konatigos kun li. Elstara junulo. Li studis sciencojn, mi longe konversacias kun li pri la pasinteco de Rusujo. Li tage kaj nokte serĉas en monaĥejoj, trovas kronikojn, li havas ideon verki libron sub nomo «Kerno de la historio rusia» por ĉiuj, kiuj deziros pri la rusia historio havi komprenon. Lin obsedas penso, ke ni malmulte scias pri nia pasinteco, malmulte pensas pri la pasintaj tagoj, malmulte serĉas tie vojojn por la estonteco...

La onklo eksidis sur la benkon, ree ekparolis, komencis rakonti, kiel rusoj iradis komerci al Konstantinopolo. La kancelariestro estis rakontanta, kvazaŭ li mem estis tie, antikvaj kronikoj viviĝadis en lia rakonto, viviĝadis kriviĉoj kaj luĵiĉoj[35] — jen ili hakadis arbojn, dikajn je multaj arŝinoj, ĉizadis ilin, elbruligadis per fajro, kaj kiam Dnepro puriĝadis de glacio, peladis siajn skediojn al urbo Kievo...

De Kievo malsupren Ievlev eknavigis kune kun Manjo, ŝi staris en grandega barko, tenis lian manon, aŭskultis tion, kion li estis diranta al ŝi, kapjesadis per sia ĉarma kapo.

— Sed vi ja dormas, nevo? — kun bonkora moko en la voĉo demandis la onklo.

— Mi ne dormas! — ekkriis Silvestro Petroviĉ. — Tute ne dormas. Mi aŭskultas kun tuta atento...

...Ree ekiris la barko. Ili trairis la riverkaskadon, sur la potencaj manoj la bravaj princaj kompanianoj ektrenis la skedion sur la tero, kaj malicaj peĉenegoj en tiu tempo ekatakis ilin sur ĉevaloj, ekfajfis sagoj, ektintis bulataj[36] pezaj glavoj,

35 Kriviĉoj kaj luĵiĉoj — antikvaj slavaj triboj. *(trad.)*

36 Bulato — speco de hardita tre firma ŝtala alojo, deveninta el Hindio, Mezazio kaj Persio, konata kaj uzata por armiloj en antikva Rusujo.

disfendiĝis ŝildo, kaj malantaŭ la ŝildo staris Manjo kaj estis diranta: — Sub veloj la tutan vojon ĝis Konstantinopolo mem!

— Je Dio, li dormas! — ridante, diris Rodiono Kirilovič.

Ievlev kun peno malfermis la okulojn. Diversvoĉe ĉirpadis griloj, ekstere apud la Presejo pasadis gardistoj, interkriante, timante maliculojn.

La onklo, ridetante, balancis la kapon.

— Mi al li diligente rakontas, kaj li, jen, ekdormis...

Ekstere, trans la fenestroj, oni ekkriis: «helpon!» Ievlev leviĝis sur la kubuto.

— Dormu, dormu, neveto! — diris Rodiono Kirilovič. — Al nenio eblas helpi. Ĉiutage nun oni en Moskvo petolas. La bojaroj ne admoneblas. En nia distrikto Streŝnev kun kamaradoj ĉiunokte mortigas homojn, la mortintojn prirabas... Nu, dormu, dormu, infano...

Silvestro Petrovič tiris sin, metis la manojn sub la nukon, suspiris per la tuta brusto: ĉu sendi svatantojn por Manjo? Sed kiel vivi poste? Kaj li, kaj ŝi havas nek ĉelon, nek kelon, nek meblon! Kaj ne eblas atendi de iu ajn! Malriĉa naskiĝis Silvestro Ievlev...

Sed se tamen?

Kun tiu «tamen» li ekdormis. En sonĝo li vidis Manjon tia, kia ŝi sidis hodiaŭ ĉe la tablo: en veŝto el griza lepora pelto, kun klara rigardo de larĝe malfermitaj pensemaj okuloj, kun malhelaj nevusoj sur la vango. Kaj li kvazaŭ prenis ŝian manon kaj ekkondukis. Kaj sur la bordo estas ŝaŭmaj ondoj, kaj sur la ondoj balanciĝas skedioj. Zumas vento, Maria Nikitiĉna ne

timas, iras al la lago, ridetas. Kaj aŭdiĝas la voĉo de la onklo:

— Jen kia proda dormo! Leviĝu, Silvestro, la suno jam estas alte!

4. En la Ambasada Kancelario

— Jen li, mia Adreĉjo! — kun plezuro rigardante en la malfermitan, ankoraŭ tute junan vizaĝon de Ĥilkov, estis diranta oĉjo Rodiono Kiriloviĉ. — Amu kaj estimu lin, Silvestro! Kaj vi lin salutu, Andreĉjo! Li estas bona ulo, la kapo sur la ŝultroj ne kiel kukumo kreskas, nun li floton konstruas en Perejaslavlo-Zalesskij, ĉio por li, por karulo, estas tie nova. Ŝipkonstruejo estas afero nova, ŝipo — entute neaŭdita, la sola espero estas al klera fremdulo, tamen tiu sciis, sed nun ĉion forgesis...

La onklo estis gaja, subridadis, karesadis al Ĥilkov la ŝultron. Ĥilkov estis sinĝeneme ridetanta, fingrumadis siajn apenaŭ aperantajn lipharojn. La kancelariestro petis:

— Vi, Andreo Jakovleviĉ, estu afabla, montru al la nevo niajn riĉaĵojn. Li eksciu, ke ne sur sola fremdulo la mondo staras. Ĉar ili nun nur aŭskultas, kion oni al ili en Kukujo mensogas. Mi mem ne havas tempon, mi venos pli poste, ni ankoraŭ konversacios...

Rodiono Kirilovič foriris, Ĥilkov vokis kancelarianon kun kandeloj, tiu tra malhela vestiblo alportis trikandelan kandelingon. Alia kancelariano malfermis feritan pezan pordon, trans la pordo estis kamero, en kiu la onklo pasigis preskaŭ tutan sian vivon.

Ili eksidis apude ĉe granda kverka tablo. Ievlev ĵetis flankan rigardon al Ĥilkov — ekvidis krute krispajn harojn sur delikata knabineca kolo, ruĝan vangon, lanugajn, fleksitajn okulharojn.

Andreo Jakovleviĉ nelaŭte diris:

— Bone estas ĉi tie, ĉu vere, Silvestro Petroviĉ?

— Ĉi tie? Nu, nemalbone...

— Sed laŭ mi, pli bona angulo nenie ekzistas. Kiam mi ŝlosas min ĉi tie kaj komencas foliojn foliumi... Mi eterne ne forirus, sed la sorto estas alia...

— Kia sorto? — demandis Ievlev.

— Hieraŭ mi eksciis — kvazaŭ veturos mi kun ambasado en forajn landojn...

Li silentis iom, enpensiĝinte, poste komencis gardeme transmeti antikvajn manuskriptojn, envolvitajn en maldikan bovidledon, kronikojn, analojn, pergamenojn. Metinte unu el ili antaŭ si, li foliumis, klarigis:

— Tio estas hagiografioj de la sanktaj princoj Boriso kaj Glebo. El ĉi folioj vi havas eblon, Silvestro Petroviĉ, vidi, kiel navigadis niaj prauloj...

Sur la flava pergameno estis arte montrita barko, fleksita, kvazaŭ novluno. Dek unu rusaj batalistoj en pintaj helmoj, kun grandaj lancoj en la manoj, estis navigantaj sur maro en tiu barko. Kvar remiloj estis mallevitaj en la akvon, ĉe la kvina sidis la rudristo.

— La ŝipo troviĝas en navigado! — estis diranta Ĥilkov. — Kaj tio ankoraŭ ne estas ĉio. Ĉi tie ni vidas ne fruktojn, sed nur florojn. Tiel iris al Konstantinopolo la kompanioj de Olego.

Standardoj, ĉu vi vidas, Silvestro Petroviĉ! Standardoj, alivorte flagoj. Lancoj! Kaj nun ni ĉi tie rigardu — la Pskovan kronikon...

Al la ferita pordo frapadis kancelarianoj, demandadis pri la estro. Ĥilkov komence ne respondadis, poste malfermis la pordon kaj tiel abrupte kriis al maldiligenta kancelariano, malbone reskribinta foliojn, ke Silvestro Petroviĉ eĉ balancis la kapon. Kaj la kancelariano timigite retropaŝis de la juna princo, kaj estis videble, ke Ĥilkov ĉi tie estas estro kaj ke, malgraŭ lia juneco, oni ne ŝercu kun li...

Andreo Jakovleviĉ plu elmetadis el ferita kofro novajn kaj novajn manuskriptojn, librojn, notojn, akompanante ĉiun per saĝa kaj nelonga rezono. La okuloj de Ievlev brilis pro avido — legi ĉion mem. Andreo Jakoveviĉ rezonadis trankvile, multon li sciis parkere. Silvestro Petroviĉ nur miradis, kiel eblas memorfiksi tutan tiun komplikaĵon.

Poste venis la onklo, demandis:

— Kio, neveto? Ĉu vi havas, kion lerni de ni? Sed vi ĉiam: germanoj, fremdlandanoj!

— Sed mi ja...

— Sed mi ja! — mokimitis Rodiono Kiriloviĉ. — Konas mi vin ĉiujn! Ne vane Križanić skribis, ke ni pri ĉiuj fremdaj aferoj miras, laŭdas ilin kaj levas ĝis la ĉielo, sed nian hejman vivon ni malestimas. Ho, malbenita fremdpotenco, estu ĝi damnita!

Li eksidis sur la kofron, ekparolis kun malgajo en la voĉo:

— Mi verŝajne kvin dekojn da jaroj pasigis ĉi tie, kaj nenion vidis, krom ĉi riĉaĵojn. Via patro edziĝis, naskis infanojn,

militis, vidviĝis, ankoraŭfoje edziĝis, la bienon disipis por siaj frenezaĵoj, dum mi kun lambastono — akumuladis, jen ili, miaj juvelaĵoj, diamantoj, smeraldoj, perloj netakseblaj kaj netaksotaj, jen ĝi, riĉaĵo granda...

Sur la frunto de la maljunulo ŝvelis vejno, lia pala vizaĝo rozkoloriĝis; minacante per la lambastono al nekonata malamiko, li plendadis:

— Librovermoj, incendioj, kiom da ili estis en Moskvo, la poloj, la tataroj, la propraj bojaroj. Kiam ili deziras fari donacon al fremdlandano — ili venas ĉi tien, — estu ili damnitaj. Stultaj, malkleraj, sovaĝaj, — kion valoras por ili ĉi trezoroj? Pergamenon, pro kiu mi dum noktoj ne dormas, li donacas al negocisto, fremdulo, kaj kiom ĝi valoras por tiu? Por tiu dek ĉervoncoj estas pli profitaj. Kancelarianoj ŝtelas, neniu fideblas. Vi, infaneto, dirus al Petro Aleksejeviĉ, eble? Jen, al li estis espero — al Ĥilkov Andreo Jakoveviĉ; mi pensis, kiam mi mortos — li gardos; sed ankaŭ en tio estas malsukceso, li veturos en fremdajn landojn kun ambasado. Al kiu mi fordonos la ŝlosilon? Sub la kapo mi ĝin tenas, kiam ie en Moskvo estas incendio — la koro tremas, mi kuras, kiel freneza.

Li malfermis la pordon, kriis:

— Sakon, Ŝiŝkin!

La kancelariano alportis ambasadan sakon — ledan, forte odorantan, kun firmaj agrafoj kaj rimenoj. La onklo longe fosis sur la tablo kaj en la kofroj, elektis foliojn, envolvis en marokenon, la marokenon ĉirkaŭligis per kunvolvita blanka ŝnuro, poste pakis ĝin en la sakon. Ievlev kaj Ĥilkov rigardis ne komprenante. La onklo diris:

— Kvazaŭ senintence metu ĉi foliojn en la ĉambron de Petro Aleksejeviĉ, se li venos al la lago. Li legu. La kukoloj en Kukujo diru la sian, kaj ni — la nian bonan, karan...

Ievlev riverencis.

— Pri kio ankoraŭ ni parolis? — demandis la onklo kaj mem tuj rememoris...

Lia vizaĝo iĝis ruza kaj gajiĝis, li palpebrumis al Andreo Jakovleviĉ kaj ordonis al tiu ŝlosi la pordon. Silvestro Petroviĉ kun miro rigardis, kiel Ĥilkov firme ŝlosis la pordon kaj per hoko kaj per riglilo.

— Ĝi estas ĉe ni kaŝita, — estis diranta Rodiono Kirilloviĉ, — ĝi ĉe ni estas bone kaŝita, ni scipovas kaŝi...

Nun ridetis ankaŭ Andreo Jakovleviĉ.

Ektondris, ekklakis, ekknaris komplika seruro; la onklo malfermis la kofron, turnis ankoraŭ unu ŝlosileton en kaŝejo. Grincis nevidebla por okuloj risorto, malhela pro aĝo tabulo mem deŝoviĝis flanken; libroj, binditaj per flava bovidledo, la dorsojn supren estis dense starantaj en la kaŝejo. La onklo glatumis ilin garde, klakis per la lango, eltiris unu, malfermis. Tio estis Koperniko, eldonita de tipografiisto en urbo Regensburgo antaŭ preskaŭ cent kvindek jaroj.

— Latino, — kun ĉagreno diris Ievlev.

— Kaj vi ĝin ellernos! — kriis al li la onklo. — Jen Andreĉjo ellernis, kaj mi ellernis, kaj ankaŭ vi ellernos...

Li komencis elpreni el la kaŝejo volumetojn, viŝante ĉiun garde per la polmoj, dirante:

— Keplero, fraĉjo, same estas en Latino, kaj sen Keplero

kia vi estos marnavigisto? Ili, neveto, estas ne viaj holandaj maljunuloj, ne viaj germanoj el Kukujo, kiel sen ili vivi?

— Sed kial ili estas kaŝitaj? — mallaŭte demandis Ievlev. — Por kio ili estas en kaŝejo?

— Kontraŭ damnitaj popaĉoj, kontraŭ la nigra korvaro, — respondis Rodiono Kirilovič. — Gardu vin de ili ankaŭ vi, neveto, gardu vin, kara. Andreĉjo ja la Kepleran instruon, verŝajne, tutan ne elirante el la Kancelario, ŝlosiĝinte superis...

La onklo rondigis la okulojn, proksime kliniĝis al Ievlev, diris mistere, gaje, per juna voĉo:

— Ne ĉirkaŭ la tero la planedoj iras, sed nia tero mem kun aliaj planedoj ĉirkaŭ la suno kuras. Nu? Kielas tio por popaĉo? Kiel akra tranĉilo! Ĉio estas renversita kaj falas en la inferon. Dum ili tie unu al la alia la barbojn ŝiras — ĉu dufoje diri «haleluja» aŭ trifoje, ĉu per du fingroj krucosigni aŭ per tri, ni ĉi tie en silento kaj kvieto, vidu, kion ekkonas...

Li rapide per la lertaj manoj envolvis du volumetojn en puran tolaĵon, ĉirkaŭligis per ŝnureto, donis al Silvestro Petrovič:

— Timmerman via ne tre bone, sed tamen scias Latinon. Eble, ion utilan vi el tio ĉi ekscios. Mi rezonas tiel: nun sen Koperniko esti — kvazaŭ esti en mallumo...

— Ĉu je ksenomanio ni ne malsaniĝos, oĉjo? — ne sen ruzeco en la voĉo demandis Ievlev, tenante en la manoj la librojn de Koperniko.

Rodiono Kirilovič forsvingis, respondis solene:

— Tiuj viroj estas ornamo de la homa gento. Feliĉaj estas la

poloj, ke ili havas Kopernikon sia filo, kaj la germanoj, ke de ili devenis Keplero. Tiel memorfiksu. Nu, Dio estu kun vi! Kaj kun Andreĉjo brakumiĝu, eble iam ankoraŭ vin renkontigos la sorto...

Kaŝinte la valoregajn librojn, agrafinte la rimenojn de la leda sako, Ievlev facile enseliĝis. La onklo kaj Andreo Ĥilkov adiaŭe mansvingis al li de sur la perono. Lia falva virĉevalo tuj ekkuris galope, kaj vespere Silvestro Petroviĉ jam estis sur la lago. Sur la vojo al la domo li rimarkis: dum la pasintaj du tagoj la katenitoj levis la varfon ĝis la necesa nivelo, duono de la tabuloj jam estis alfiksita per lignonajloj...

Ievlev fordonis la ĉevalon al servisto; larĝe paŝante, senkonscie ĝojante pri io, malfermis la pordon. La holandaj maljunuloj estis bakantaj sur braĝujo nederlandajn dolĉajn krespojn, trempadis en melaso, altrinkadis per sia kafo; ili havis ĉion apartan, eĉ farunon ili tenis en sia ŝlosita kofro. Teodoro Matejeviĉ ankoraŭ ne revenis. Voronin, sulkante la frunton ĉe la tablo, estis skribanta per grifelo ciferojn — pro enuo lernis subtrahon. Timmerman estis dormetanta en la angulo, oĥante en dormo. Silvestro Petroviĉ alsidiĝis al li, karese vekis, montris la librojn. Franco Teodoroviĉ, oscedante, tremerante post la dormo, foliumis la Kopernikan verkon, ektimis, diris, ke libro tiu estas ege malfacila, li eĉ apenaŭ kaptos la sencon de tio, kio estas en ĝi. Tamen li promesis pensi, eble li komprenos la doktaĵon...

— Kion oni diras en Moskvo? — de sur la forno, tuse purigante la gorĝon, demandis Prjaniŝnikov. — Ĉu baldaŭ oni liberigos nin, povrajn malfeliĉulojn? Je Dio, ni pereos ĉi tie sur tiu ĉi damnita lago, pro nenio pereos. Kiam mi dormas, mi

ĉiam sonĝas demonojn, aŭ kiel oni min bastonas. Ĉu bonon tio aŭguras?

— Evidente, malmulte oni vin ne en sonĝo bastonis! — severe respondis Voronin.

Teĉjo Prjaniŝnikov mallevis la nudajn piedojn; beate gratante sin, komencis rememori, kiel li vivis en la hereda bieno, — bone vivas nobelido. Kampuloj, kiam ekvidas lin, ne nur ĝis la tero riverencos, sed eĉ sur la genuojn falos kaj kiel al dio rigardos. Manĝaĵo estas ajna, kian la animo deziros, knabinoj abundas — prenu ajnan. Sed ĉi tie...

Prjaniŝnikov svingis la manon, enpensiĝis pri sia malfeliĉa sorto.

— Kio, vere, estas nova en Moskvo? — mallaŭte demandis Jakimo.

Silvestro Petroviĉ respondis, ke estas neniaj rimarkindaj novaĵoj, sed malbonas tio, ke ni scias malmulte, interesiĝas pri nenio, ne vivas, sed vegetas, sen ajna celo...

Jakimo miris, ŝultrolevis.

Ievlev sola eliris el la kabano al freŝa aero.

Kviete flagris steloj ĉu en la lago, ĉu sur la ĉielo. La arbaro — nigra kaj senmova — rigidiĝis super la bordoj. Ĉe la akvo preteriris tri kampuloj, portis korbojn kun grioj kaj faruno — por nutriĝi brigade.

Du voĉoj estis milde kantantaj:

Saltas agarik' en picear',
Serĉas agarik' rusul-amikinon...

5. Laboruloj de la mara metio

Sur la lago establiĝis tia ordo, ke la lasta, decida vorto en ĉiuj disputoj ĉiam restadis al Teodoro Matejeviĉ Apraksin. Li estis multe pli aĝa ol la ceteraj ŝipistoj, malpli flamiĝema, ol ili, prudenta, scipovis aŭskulti kaj ne hastis decidi. Ĉiuj sciis, ke Petro Aleksejeviĉ kredas al Apraksin kaj malofte kontraŭparolas al li.

Vespere, dimanĉe, atente elaŭskultinte la ŝipistojn, dense amasiĝintajn en la domo, Apraksin diris:

— Sen Arĥangelsko tamen ni nenion faros bone, sinjoroj ŝipistoj. Mi pensas: ni sendos al la Blanka maro Ievlev-on, kun li — Voronin-on. Ili trovu bonan majstron kaj urĝe veturigu lin ĉi tien. Decembro venis, kion ni ankoraŭ atendu?

Franco Teodoroviĉ Timmerman mallevis la kapon, li sciis, kiun riproĉas Apraksin.

— La vintro pasos, la floto ne videblas, — estis diranta Teodoro Matejeviĉ. — Rezultos, ke nenio estis farita...

— Ĉu ni en tio kulpas? — demandis Rĵevskij. — Ĉu ni ne penis? Kaj la floto ja estas amuza, kiu ĝin nun bezonas?

— Kaj la amuza fortreso Presburgo — kio pri ĝi? — respondis Apraksin. — Ĉu ĝi estas por batalo? Ĉu ni tatarojn atendas kaj kontraŭ ili Presburgon konstruis?

Iu el la ŝipistoj ekridis. Apraksin frapis al la tablo per la polmo — denove estiĝis silento.

— Ne por batalo, Bazilo Andrejeviĉ, por amuzo estis konstruita la fortreso, nomata Presburgo, — severe diris Apraksin. — Sed amuzoj, vidu, iam iĝas gravaj aferoj, tion vi

ĉiuj ne pli malbone ol mi scias...

— Do ni iru al Presburgo, — petis Rĵevskij. — Kion ni ĉi tie atendu? Niajn laborojn la Siro ja ne vidas, ni ĉi tie tute pro tristo-malgajo sen bona vorto pereos...

Ievlev turnis la kapon, mense veante: ĉi nobelido naskiĝis tute ne simplanima. Ĉiam li preferas esti antaŭ la okuloj de la caro! Juna, sed ruza, ho, kiel ruza estas bojaro Rĵevskij Bazilo Andrejeviĉ...

— Ni nenien iros el ĉi tie! — prononcis Apraksin. — Kaj mi timas, Bazilo Andrejeviĉ, ke vi diris veron — ne vidos la Siro niajn laborojn, tamen ne gravas. Ni ne pereos...

Li forturniĝis de Rĵevskij kaj daŭrigis, turnante sin al la aliaj ŝipistoj — Ievlev, Voronin, Lukov, alta Teodoro Prjaniŝnikov, kiu, tuj kiam alveturis al la lago, surgrimpis la fornon kaj artifikis dormadi dum tutaj tagnoktoj:

— Presburgo estas amuzo Marsa, kaj ĉi tie, sur nia lago, devas esti amuzo Neptuna, — estis diranta Apraksin. — Kio estis Presburgo? Ĉu vi forgesis? Antaŭ du jaroj estis tablestroj kaj ĉambelanoj, ĉevalestroj kaj ĉasbirdistoj, ĉevalistoj kaj hejtistoj, sed nun estas regimentoj, ne tiel facile venkeblaj, kiel tiuj, kiujn princo Bazilo Baziljeviĉ Golicin kondukadis kontraŭ la tatarojn. Nun tie estas soldatoj, nun tie estas oficiroj, nun tie estas gardistejo, nun tie estas servo! Kaj ni kion faras? Ĉu sidas kaj atendas, ĝis rotestro Petro Aleksejeviĉ pri tiu Neptuna amuzo indiferentiĝos? Kaj kio bona en tio estos? Kaj kiuj estas ni mem!

Prjaniŝnikov ne respondis, kolere grimpis sur la fornon — dormi plu. Rĵevskij estis morne rigardanta al Apraksin. Jakimo

Voronin diris malgaje:

— Veturi ja eblas, sed kiel ni ĝisveturos?.. La vojo ne estas proksima, sur vojoj, oni diras, rabistoj abundas, trancas per tranciloj. Kaj kie ĝi estas — tiu maro Blanka? Eble, ĝi entute ne ekzistas en la mondo...

Ievlev ekridis, frapis Voronin-on al la larĝa ŝultro:

— Ne ploru, Jakimo! Trovos ni la Blankan maron...

Ili prepariĝis al vojaĝo rapide — dum unu tago. Ĉe sunleviĝo de frosta, venta tago al la domo, knarante per la glitiloj, alveturis basta sledo kun vica jungitaro. En la sako de Silvestro Petrovic kuŝis cara vojaĝpapero, ambaŭ vojaĝantoj havis bonajn trancilojn el nigrigita ŝtalo, paron da pistoloj, sabrojn. Jakimo provizis sin ankaŭ per manĝaĵo por longa vojo — fumaĵitaj anseroj, femuraĵo, krucо da vodko. La kocero fajfis, volvis la kondukilon sur la manon, la sataj cevaloj ekiris tuj per bona rapida troto...

Ili veturis al Jaroslavlo — Vologdo — Kargopolo. Furiozaj glaciaj januaraj ventoj brogadis la vizaĝojn, la frosto penetradis sub la peltmantelojn, malvarmigadis la piedojn. Ili revadis nur pri varmo, kvieto, pri tio, ke ne knaru en arbaro centjaraj, trafrostiĝintaj arboj, ke ne kuru post la sledo luparoj kun lumantaj okuloj, por ke la malvarmo ne kaptu la koron mem.

Dum tago kaj nokto tintadis per frostiĝinta obtuza sonoro la sonorileto sub la arko de la timoncevalo, dum furioza kurado la sledo ofte renversiĝadis, kocеroj lamentadis:

— Jen, kia embaraso! Prefere vi, bonaj sinjoroj, ne dormu dum veturado...

Alveturante al stacio, ne malrapidigante la kuron, kocero

fajfadis surdige, per speciala koĉera fajfo. Sur la peronon de la stacio elkuradis postdorma, hirta staciisto. Dum oni rejungadis ĉevalojn, Ievlev kaj Voronin side dormetadis en la varmege hejtita, sufoka domo. Dum la tuta dekunutaga vojo por noktumo ili ne haltis eĉ unu fojon. Ili dormadis en la basta sledo, dense alpremiĝinte unu al la alia, elturmentitaj, surkreskitaj de barboj, nelavitaj...

En Onego brava kantema koĉero, sciante, por kio veturas la tablestroj, alveturigis ilin al malalta granda domo, konstruita el traboj kun tranĉitaj ekstremaĵoj, ĉirkaŭigita per barilo el nigriĝintaj pro aĝo palisoj.

— Jen li, — diris la koĉero. — Aleksio Kononoviĉ estas la unua en Onego rudristo. Ankaŭ lia frato rilatas al la ŝipa metio — ĉiuj lin konas. Pli bonan vi ne bezonas...

La pordegon por la gastoj malfermis la mastro mem, malalta viro kun severa, faltoplena vizaĝo. Salutinte, li metis sur la tablon maceritajn kamemorojn, iris hejti la banejon. Kiam ili ŝvitbanis ĝissate, Korelin manĝigis la venintojn per salma supo kaj kuŝigis dormi sur altajn plummatracojn. La gastoj tradormis preskaŭ tagnokton, vekiĝis vespere — gajaj, malsataj, kontentaj. La mastro estis atendanta ilin, legante libron en bindaĵo kun verdiĝintaj pro tempo kupraj agrafoj. Ŝanceliĝanta flamo de helicaj kandeloj estis prilumanta lian frunton kun kalvaĵoj, la helajn okulojn, la arĝentan longan barbon.

La gastoj eksidis apude sur la benkon. La maljunulo atente, sen miro, elaŭskultis rakonton de Ievlev, pensis, poste diris:

— Bone, barkojn oni ĉe ni konstruas. Lernu — la afero estas bona...

— Ne barkojn ni bezonas — ŝipojn! — interrompis Voronin.

La rudristo ĵetis severan rigardon al Jakimo, klarigis:

— Niaj barkoj estas ĝuste ŝipoj. Tiel ili en nia maniero, en la pomora, nomiĝas. Iras ni sur niaj barkoj al malproksimaj lokoj. Al Grumanto, al Matko, al Kolgujevo...

Ievlev kaj Voronin nekomprene interrigardis. Ili neniam aŭdis tiujn nomojn. La maljunulo divenis, ekstaris, malŝlosis antikvan pezan skatolon, gardeme metis sur la tablon volvaĵon el griza tolo. Nehaste malligis ŝnureton, elprenis ĉu pergamenojn, ĉu ledajn pecojn — kvadratajn, densajn, flavajn pro tempo...

— Do... kio ĝi estas? — demandis Voronin.

— Ja betulbasto! — subridis Korelin. — Ĉu vi ne aŭdis, ke oni tiele betulbaston prilaboras? Papero aŭ pergameno por pomoro tro multe kostas, do li al si mem eltrovis ion pli malkaran...

Alŝovinte la kandelingon pli proksime, la maljunulo diris:

— Jen, rigardu, sinjoroj, kiaj vojoj estis de ni iritaj...

Per la malmola ungo li desegnis sur la betulbasto linion — de Onego al Kolgujevo:

— Tio estas vojo proksima...

Silvestro Petroviĉ atente rigardis al la basta folio, kaj ekvidis eltranĉitajn konturojn de bordoj, duoninsulon, golfojn. Tio estis mapo — arte kaj bele farita, kun ŝipetoj, navigantaj sur maro, kun hometoj, starantaj sur la bordo, kun arboj, kreskantaj en riveraj buŝoj, kaj kun bestoj, kvazaŭ konversaciantaj inter si sur

malproksimaj insuloj.

— Kiu do estas tiu brava marnavigisto? — demandis Voronin. — Kiu desegnis tiun mapon?

Korelin ŝultrolevis, suspiris:

— Mi ne scias, sinjoro. Tio estis antaŭ longe. Vidu — mi estas grizhara, kaj la bastan libron mi ricevis de mia patro. Juĝu vi mem...

Ĝis la noktomezo ili sidis triope ĉe la tablo, fermetinte la okulojn fiksrigardadis al la duone forviŝitaj de la tempo majstraj mapoj sur betulbasto. La maljunulo penseme diris:

— Estus bone por vi, karaj sinjoroj, kunvenigi niajn bonajn rudristojn, sed nun multaj en foraj teroj vintrumas. Panov foriris al Grumanto, Semisadov — bona rudristo, lerta — kiel brigadestro foriris al la norvegoj; Rjabov Ivano filo de Sabateo — de la Nikolo-Korela monaĥejo — ĉasadis rosmaron sur Matko, tie li, verŝajne, ankaŭ ĝis nun vintrumas. Timofejev Antipo same ie enkaptiĝis. Ili estas multaj ĉe ni — ni trovos, kun kiu konversacii pri la mara metio. Kaj morgaŭ alveturos mia propra frato — Ivano Kononoviĉ, li ĉe ni en Pomorio estas la unua barka majstro... Kun li venos Koĉnev — homo de rara saĝo, de la praavoj tuta ilia familio konstruadas barkojn...

Nokte Ievlev, Voronin kaj Aleksio Kononoviĉ, vestiĝinte pli varme, eliris sur la peronon rigardi nordlumon. Silvestro Petroviĉ aĥis, ne kredis al la propraj okuloj, laŭte demandis:

— Ja kio estas ĝi? Jakimo, ĉu vi vidas?

En la nigra ĉielo malrapide moviĝadis, interpuŝiĝante, brulantaj bluverdaj fostoj, faladis, ree leviĝadis, prilumante per sia stranga malvarma fajro kovritajn de briletanta neĝo

tegmentojn de onegaj domoj, la vojon, la senmovan, rigidiĝintan spacon de la golfo...

— Sur Matko ja ili pli timige ludas! — diris la maljunulo. — Ĉi tie la lumoj ja estas kvietaj, sed sur Matko, en granda malvarmo, tiaj lumoj vivas — eĉ netimiĝema ulo sin krucosignos. Ili iras, kaj kun krakado, kvazaŭ tondro bruas.

La fostoj estingiĝis, nova spektaĵo aperis antaŭ Ievlev kaj Voronin. El densiĝinta obskuro komencis kvazaŭ elŝiriĝi sparkoj, poste ili ekbrulis per seninterrompa fajro, disŝutante etajn, rapidajn, flugantajn kiel fulmoj malgrandajn fajrojn. Jam estis brulanta duono de la ĉielo, — ŝajnis, tie devis stari senĉesa potenca tondrado, kaj estis mirinde, ke la noktan frostan silenton nenio rompas.

— Al forĝejo similas! — diris Ievlev. — Kvazaŭ forĝoforno tie estas sur la rando de la tero...

Frostiĝinte, ili revenis en la domon kaj ankoraŭ longe paroladis pri la lumoj.

— Se al niaj ŝipistoj rakonti — ili ne kredos! — suspiris Jakimo, malvestiĝante.

— Ili multon ne kredos! — flustre ripetis Ievlev. — Multon...

En la mateno, tuj post la sunleviĝo, ili ekiris al la Onega golfo — rigardi al pomoraj barkoj, ŝalupoj, boatoj. Ne kredante al siaj okuloj, Silvestro Petroviĉ mezuris longon de barko — naŭdek futoj, — ŝipo! Starante supre, sur la ferdeko, Ievlev kriis suben al Voronin:

— Jakimo, ĉi barko pli grandas ol tiu, kiun havis Kristoforo Kolumbo...

La ŝipoj estis levitaj sur skafaldojn el traboj, staris alte. Korelin koncize, avare, sed kun fiero rakontis, kiu ŝipo kiam estis konstruita, kioman akvon iras, tio estas kiom da jaroj navigas, kie ĝi estis, kio al ĝi okazis en navigadoj. En frosto, sub helaj radioj de la vintra nevarmiganta suno, staris gaja odoro de peĉo, kaj gaje estis rememori la perejaslavlajn turmentojn, Timmerman-on, la ŝipkonstruejon, kiun tie oni neniel povis finkonstrui...

Dum ili rigardis al la ŝipoj, sur la bordo kunvenis vera amaso da pomoroj, tiuj iradis malantaŭe, subridadis en la densajn prujnokovritajn barbojn, ĵetadis ruzajn rigardojn al la gastoj. Poste ĉiuj amasiĝis apud la barko de Korelin, premante unu al la alia, komencis rakonti pri si, pri siaj okazoj, pri vintrumadoj, pri vojaĝoj, kiel ili iradis al malproksimaj landoj, al fremduloj, kiel ili estis ĉe la norvegoj, kiel ĉasadis, kiel fiŝkaptadis...

Ievlev, malvarmiĝinte en frosto, ordonis al Aleksio Kononoviĉ tuj kunvenigi rudristojn al si por konversacio, kaj mem sendis por vino bofilinon de Korelin — Helenjon, etendis al ŝi ĉervoncon por elspezoj. Helenjo movis la zibelecan brovon, subridis per la ruĝaj lipoj, la oran moneron ne tuŝis, diris kun ofenda neglekto:

— Nia domo ja estas ne gastejo, ne drinkejo. Ni respektos gastojn ankaŭ sen via monero.

— Tro fieras vi! — miris Silvestro Petroviĉ.

— Tia naskiĝis...

— Ino devus esti pli humila, — konsilis Voronin.

— Inojn oni melkas por lakto, — brilinte per la okuloj, diris

Helenjo. — Kaj mi estas fiŝista edzino, mastro por mi mem.

— Por vi la edzo estas mastro! — edife prononcis Jakimo Voronin.

— Ni iru printempe en la maron, bravulo, — diris Helenjo, — tie vi vidos, kiu por kiu estas mastro...

Kaj ŝi foriris fari paston por pirogoj. Aleksio Kononoviĉ moke ridetis, silentis.

— Kial ŝi pri maro diris? — nekomprene demandis Voronin.

— Ja tial, ke ŝi rudristas nun, barkojn kondukas en forajn vojaĝojn.

— Ŝi?

— Ŝi, Helenjo. Ŝi estras virojn, ili timas ŝin, kiel Dion. Severa virino...

Voronin grakis, balancis la kapon malkrede: tielaĵon ankoraŭ nek li, nek Ievlev vidis.

Vespere en la ĉefĉambro ĉe Aleksio Kononoviĉ kunvenis ĉirkaŭ tridek laboruloj de la mara metio, kun ili estis virinoj, sciantaj la maron. Ĉe la tablo sidis ankaŭ la barkaj majstroj Ivano Kononoviĉ kaj Koĉnev.

Vaporis pirogoj kun platfiŝo, kun salmo, kun viando. Rondiris sur la manoj argila kruĉo kun vodko de duobla distilo. Interrompante unu la alian, neofende mokante siajn malsukcesojn, rudristoj, fiŝistoj, remistoj, logaĵistoj rakontadis, kien ili vojaĝis, kion vidis, kiel vintrumis, funebre rememoradis, kiel ili sepultis siajn amikojn en glaciiĝinta grundo, kiel la maro rompadis barkojn kaj kiel foriradis homoj

el mara embaraso. Voronin kaj Ievlev sidis senmove, larĝe malferminte la okulojn, kredante kaj ne kredante. Jakimo ridegadis pro ridindaj rakontoj, teruriĝadis pro la timigaj; puŝante la flankon de Silvestro Petroviĉ, flustradis:

— Ja, Dio sankta, jen ĝi, ŝipa floto. Kaj kion ni faras tie, en Perejaslavlo? Boaton kaj ŝalupon? El ĉi tie necesas homojn konduki, ili scias, kun ili ni ĉion faros kiel necesas! Ne sufiĉas solaj ŝipaj majstroj! Ŝipon ni konstruos, sed kiu sur ĝi navigos? Ĉu vi, mi kaj Prjaniŝnikov? Ne multe ni kun ili navigos!

Helenjo, ĉitinte al la viroj, por ke tiuj bruu malpli, per malalta forta voĉo komencis kanton:

Saluton, patro nia, ho Grumanto.
Longe iris ni al vi sur barkoj...

Dum la kantado la barka majstro Koĉnev kliniĝis al Ievlev, demandis, por kio necesas ŝipistoj en Moskvo. Ivano Kononoviĉ subridis:

— Por peli boateton sur Jaŭzo sub velo...

Silvestro Petroviĉ ĵetis malafablan rigardon al Ivano Kononoviĉ, nehaste rakontis al Koĉnev, ke en Perejaslavlo-Zalesskij oni intencas konstrui amuzan floton. Koĉnev demandis:

— Do por amuzi kiun? Ĉu infanojn etajn?

Ievlev diris severe:

— Por la Siro estas destinita la floto — por Petro Aleksejeviĉ.

— Kaj fremduloj kleraj — ili ne povas, ĉu? — demandis Korelin.

Ievlev ne respondis, forturniĝis, kuntirinte la brovojn.

Kiam la gastoj disiris, Silvestro Petroviĉ diris al Aleksio Kononoviĉ, ke li intencas preni el Onego kun si al Moskvo ĉirkaŭ centon da laboruloj de la mara metio. La rudristo silente movis al Ievlev mirigitan rigardon. Timoteo Koĉnev kun moko en la voĉo demandis:

— Kiel do? Ĉu laŭ deziro aŭ devige?

Jakimo Voronin frapis per la pugno al la tabloplato, kriis:

— Ni estas caraj proksimaj tablestroj...

— Vi, knabo, la gorĝon ne ŝiru! — severe interrompis Ivano Kononoviĉ. — Vi nin ne timigos. Diru klare, por kio vi bezonas homojn, ĉu por longe, de kiu iros cara salajro, ni ĉi tie estas homoj liberaj, super ni ne estas bojaroj kaj princoj...

Liaj okuloj malamike brilis malantaŭ la okulvitroj, en la voĉo aŭdiĝis retenata kolero. Ievlev tiris la manikon de Jakimo, komencis paroli mem. Li parolis ne haste, trankvile, oni aŭskultis lin atente. La vizaĝo de Aleksio Kononoviĉ iĝis malpli severa, majstro Koĉnev kapjesadis, Korelin subite demandis:

— Sed por kio vi, se vi estas ŝipistoj, navigos sur lago? Ĉe ni ĉi tie estas maro, ĉi tie ankaŭ kuraĝaj homoj por floto troviĝos, veraj maristoj. Kaj en lago estas kiel en flako...

La okuloj de Ievlev brileris, li diris gaje:

— Tio estas penso bona! Sed komence necesas homoj por nia lago, sen ili kun fremdlandanoj ne eblas konstrui ŝipojn...

Koĉnev demandis:

— Sed ĉu vi ne jugos nin, sinjoro, por ĉiam? Se iu trafos en

malliberon, kiel li liberiĝu? Kaj se ĉi tie estas edzino kun infanoj? Diru rekte, sincere.

Silvestro Petroviĉ pensis, respondis post paŭzo:

— Ne estos jugo, mi ĵuras per Dio pri tio. La ŝipojn sur la lagon ni mallevos, kaj tiuj, kiuj deziros reen — iros libere.

— Ĉu vere? — demandis Korelin.

— Vere.

— Bone, ni pensos, diskutos inter ni! — diris Koĉnev. — Eble, troviĝos dezirantoj...

Da dezirantoj troviĝis ne multe — inklude Timoteon Koĉnev-on naŭ homoj. Jakimo Voronin diris al Ievlev, ke necesas preni sen deziro, Silvestro Petroviĉ ne konsentis. En la tago de forveturo al Moskvo el naŭ restis kvar. Koĉnev, en ŝafa peltmantelo, en varma ĉapo, en pugnogantoj, staris sur la perono kaj subridis pri kolero de Voronin:

— Kiu tion deziras, sinjoro? Ĉi tie ja estas pli libere. Unu afero estas ŝipoj sur lago, sed alia afero estas sklava jugo. Eĉ mi mem dubas — ĉu mi ne eraris? Kaj la aliaj, kiuj kun ni veturas al Moskvo, — veturas ne pro ĝojo. De Eŭtimio Treskin la velboato en la pasinta jaro disrompiĝis ĝis splitoj, li ne havas sur kio iri en la maron, kaj dungiĝi al riĉulo li ne deziras. Nikoĉjo kaj Serĉjo — eĉ pli malbone: la edzinoj dronis en la maro, al ili estas triste ĉi tie...

Silvestro Petroviĉ eksidis en la sledon, Voronin kovris ilin ambaŭ per ursofela kovrilo. La koĉero movis la kondukŝnurojn, pikantaj neĝeroj ekdancis en la aero. Dua sledo ekiris poste. Ĝis Jaroslavlo ili veturis rapide, en Jaroslavlo fuĝis Serĉjo kaj Nikoĉjo. Koĉnev trankvile klarigis:

— Ili sufiĉe vidis dum la vojo la vivon-estadon, kiel la popolo en mallibero turmentiĝas. Aŭdis en stacioj kaj de koĉeroj...

Voronin, pugniginte la manojn, ĵetiĝis al Koĉnev; tiu diris abrupte:

— Ne bruu al mi, sinjoro! Miaj avoj devenis de novgorodaj riverpiratoj, ne estis timemaj, kaj bruon neniam ŝatis. Mi ne konsideros, ke vi estas cara proksima tablestro, — disbatos vin tiel, ke eĉ splitojn oni ne trovos!

Jakimo ĵetiĝis duafoje, Koĉnev per unu movo eltiris el la sino tranĉilon.

— Mi vin tranĉos, sinjoro, gardu vin, krucosignos mi vin per tranĉilo!

Ievlev perforte sidigis Jakimon en la sledon, tiu, grincante per la dentoj, estis insultanta:

— Sklavo, ido de Herodo, kontraŭ mi, Voronin, levis la manon. Lasu min...

Kaj penadis ĵetiĝi el la sledo.

Al la lago ili alveturis en malfrua nokto. La unua vekiĝis Lukov, bruligis fajron, post li leviĝis Apraksin, Timmerman, la pro ĉio timiĝantaj holandaj maljunuloj. Ekstaris eĉ la pigra Prjaniŝnikov. Nur sola Baĉjo Rĵevskij restis kuŝi sub pelto, rigardis de sur la forno per nepalpebrumanta rigardo, metadis la blondan hartufon sur la orelon...

Silvestro Petroviĉ diris al ĉiuj:

— Mi petas, sinjoroj ŝipistoj, amu kaj estimu. Barka majstro Koĉnev, Timoteo Jegoroviĉ, kun li laborulo de la mara metio

Treskin Eŭtimio. Pri la aferoj ni morgaŭ parolos, kaj nun verŝu al ni, Teodoro Matejeviĉ, po kruĉeto pro la laco, kaj ni kuŝiĝos dormi...

6. Printempe kaj somere

Matene Teodoro Matejeviĉ diris al Ievlev flustre:

— Gardu vin, amiko, de Baĉjo Rĵevskij. Se iu vorto senintence elflugas — li ĉion notas...

— Kia tia vorto? — ne komprenis Ievlev.

Apraksin pigre subridis:

— Ĉiel okazas. En kolero oni kion ajn povas diri: antaŭ nelonge mi en la konstruejo enpikis spliteton en mian manon, insultis sakre niajn ordojn, sakris ankaŭ pri Petro Aleksejeviĉ, ke indus ankaŭ al li nian malfeliĉon gustumi. En Moskvo li tiujn miajn vortojn al mi ripetis...

— Sed kiu ripetis ja?

— Siro rotestro. Denunci ja estas pli simple, ol labori. Nur iradu kaj notu, kuŝante sur forno, kaj aŭskultu... Kaj ankaŭ pri vi: vi insultis, ke bonajn najlojn oni ne sendas, ke la princo-gardanto kion deziras, tion faras. Ĉu estis tio?

— Nu, estis...

— La rotestro min pro tiuj vortoj riproĉis...

Ievlev kraĉis.

— Kraĉado ne helpos, necesas silenti! — diris Apraksin.

Abunde matenmanĝinte, Timoteo en akompano de Lukov, Ievlev, Apraksin, Timmerman, la holandaj maljunuloj kaj Rĵevskij kun mornaspekta Voronin iris rigardi, kio estis

konstruita sur la lago. Al la baterio, kies kanonoj staris sur la kabo Gremjaĉij, li ne ĵetis rigardon, al la palaco kaj la preĝejo same. La varfon li aprobis, sed ne tre...

Dum la tempo, kiam Ievlev kun Voronin veturis al la Nordo, la holandanoj sukcesis komenci la ŝipon. Timoteo ĉirkaŭiris ĝin, apogis per la pugno sian flankon, longe esplorrigardis, poste per sia obtuza voĉo ordonis rompi.

— Kion rompi? — ne komprenis Apraksin.

— Ja tion, kion vi konstruis. Ĉu tiaj ŝipoj ekzistas? Nek harmonio estas, nek akordo...

Timmerman ofendiĝis, svingis al Koĉnev la manojn en lanugaj pugnogantoj. Tiu suspiris, prenis rompostangon, batis. La katenitoj kun ululado komencis disrompi la holandan ŝipon.

Tage Koĉnev sidis kaŭre en la domo, faradis per kreto sur ligna ŝildo desegnaĵon por estonta ŝipo, flustrante per la lipoj, kalkuladis ampleksojn, forviŝadis, skribadis denove. Apraksin kaj Ievlev ne deiradis eĉ por minuto, penadis kompreni, kion li faras. Timmerman ĉe la forno snufadis per la pipo, la holandaj maljunuloj komence interridadis, poste aliris pli proksime, same ekkaŭris — por rigardi. Koĉnev desegnadis, la maljunuloj nelaŭte klarigadis al Apraksin kaj Silvestro Petroviĉ nomojn de partoj de la estonta ŝipo:

— Kilo. Kaj tio ĉi — posta steveno, aŭ poba trabo. Ĝi estos pli proksima al la akvo, kaj tie estas antaŭsteveno — prua trabo...

Timmerman batpurigis la pipon, ekdisputis kun Koĉnev, ke tiu malĝuste faras. Koĉnev dufoje respondis bruske, poste eksilentis.

Post du semajnoj sur nova skafaldo estis ekkonstruita la kilo de la estonta ŝipo «Marso». Estis videble, ke por la afero troviĝis ĝusta kapo. Ŝipaj membroj estis eltondataj laŭ ŝablonoj, la laboroj iris rapide, kun rezulto. Franco Teodoroviĉ Timmerman vigliĝis, longe konversaciadis kun Koĉnev, dum konstruado estis respekta kun li. Laboradis kaj la katenitoj, kaj vologdanoj, kaj rjazananoj, kaj Jaroslavlaj ĉarpentistoj, laboris ankaŭ la caraj ŝipistoj. Apraksin, Ievlev, Lukov, Voronin frostigis sub vento la vizaĝojn, ŝmiradis la vangojn per ansera graso, de mateno ĝis vespero ne forlasadis ĉarpentistan hakilon, vertikalilon, martelon. Dum longaj vesperoj, kiam trans la muroj hurladis neĝvento, Apraksin kaj Silvestro Petroviĉ eksciadis, kio estas matematika deklinacio kaj kiel ĝin trovi, kiel mezuri skalon, kiu estis Niccolo Tartaglia kaj kio estas «viva forto». Turmentiĝante, ili penegis lerni Latinon. Maljuna Timmerman kun grava mieno, frapetante per la manrando la tablon, nehaste rerakontadis tion nemultan, kion li estis komprenanta en Koperniko; konfuziĝante mem, rigardante en la libron, li rakontadis pri la linio de intersekco de la ekvatoro kun la ekliptiko, pri globformeco de la tero, pri sfera astronomio. Rerakontadis li ankaŭ Kepleron kun granda peno, mem ektimante tion, kion li estis diranta. La misteroj de la universo estis ekkonataj de la estontaj maristoj en la sufoka kabano sub muĝado de frostaj lagaj ventoj, ĉe lumo de sebaj kandeloj. Pro novaj, nekompreneblaj vortoj, pro nekutimaj nocioj, pro kosmaj konceptoj iam venadis teruro, la vortoj enmemoriĝadis malfacile: elipso, vektoro, radiuso... kuboj de grandaj duonaksoj de la orbitoj... kvadratoj de tempoj...

En malfrua vespero Franco Teodoroviĉ tradukis epitafon, skribitan de Keplero por si mem: «Antaŭe mi mezuradis la

ĉielon, nun mi mezuras la obskuron subteran; mia racio estis donaco de la ĉielo...»

Prjaniŝnikov sur la forno malkontentis:

— Jen kiel... ni sidos ĉi tie ĝis subtera obskuro...

Teodoro Matejeviĉ penseme frotis per la polmo sian mentonon kun kaveto, ĵetis rigardon al la forno, prononcis malgaje:

— Antaŭ la subtera obskuro necesas ankoraŭ fari multajn aferojn...

Foje al li alsidiĝis Koĉnev, komencis kune kun li analizi matematikan formulon. Evidentiĝis, ke, aŭskultante longe Timmerman-on el sia angulo, li memorfiksadis kaj komprenadis ĉion, kion instruis Franco Teodoroviĉ, kaj nun firme decidis lerni kune kun la ŝipistoj. Li havis tiom da demandoj, ke Timmerman eĉ kaptadis sian kapon, sed la ŝipistoj postuladis respondon, kaj Timmerman devis respondi, se ne hodiaŭ — do morgaŭ, se ne morgaŭ — do post tago.

— Tiele! — diradis Teodoro Matejeviĉ. — Ni, oĉjo, kontraŭ nia mono el vi ĉion elskuos: kaj tion, kion vi memoras, kaj tion, kion vi forgesis. Ni bezonas scii!

Kaj estis nekompreneble, ĉu li ŝercas aŭ parolas serioze.

Foje, sidante kun grifelo ĉe la tablo, Apraksin turnis sin al Voronin kaj demandis:

— Kaj kial vi, Jakimo, dormas tiom multe? Ĉu vi estas la plej saĝa? Aŭ honto vin ne ronĝas, ke Timoteo Koĉnev pli ol ni, caraj ŝipistoj, scias la ŝipan metion?

Jakimo raŭke respondis:

— Al mi, nobelo, sklavo ne estas ekzemplo! Li per tio nutriĝas, kion li scias, kaj min la hereda bieno satigas... Kaj kial mi kun li ĉe la sama tablo sidu?

Koĉnev prenis sian ĉapon, dense fermis la pordon post si.

— Je-es... Timoteo... — nedifinite prononcis Rĵevskij.

Ĉiuj longe silentis, poste Ievlev severe ekparolis:

— Stulta vi estas, Jakimo! Kaj por kio ni ĉi tie lokojn distingu, se inter ni estas kaj tiaj kaj ĉi tiaj, kaj malriĉuloj, kaj ĉevalistoj, kaj ĉasfalkistoj, kaj aliaj diversaj...

— Kaj ĉu al vi, Silvestro Petroviĉ, tiuj ĉevalistoj kaj ĉasfalkistoj ne plaĉas? — interesiĝis per glata voĉo Baĉjo Rĵevskij.

Apraksin palpebrumis al Ievlev, tiu demandis responde:

— Kial do ne plaĉas?

Kaj li forturniĝis, por ne vidi la blondan helokulan Baĉjeton Rĵevskij-on...

Ekde tiu tago Koĉnev ne prenadis grifelon en la manojn kaj nenion demandadis de Timmerman. Dufoje Ievlev vokis la barkan majstron eksidi al la kverka tablo, sur kiu Franco Teodoroviĉ estis dismetanta siajn librojn kaj sciencajn foliojn, kaj dufoje Timoteo morne rifuzis.

Kiam venis somero, Ievlev kaj Apraksin ofte sidadis sur la bordo de la lago kune kun Koĉnev, demandadis lin pri ĉio, kion li sciis pri maro, li sen hasto respondadis. Ĉi tie, sur la ĉeborda laga sablo, per lignero la barka majstro desegnadis ŝipskeleton, detale instruadis la perejaslavlajn ŝipistojn pri sia metio.

En junio al la lago alveturis Petro Aleksejeviĉ kun

Romodanovskij, Lefort, Gordon, kun fremdlanda ŝipestro kaj negocisto Jan Urquhart. La caro pliaĝiĝis, sed liaj moviĝoj estis same impetaj, angulecaj, kien en la antaŭa somero, la voĉo ofte rompiĝadis, la truoj de la mallonga nazo pufiĝadis. Iri li kvazaŭ ne scipovis, li kuradis, svingante la longajn brakojn. Ekvidinte la pretan por surakvigo ŝipon, li kisis Timmerman-on, kiu ĉiam scipovis esti ĉe la mano en bona minuto. Apraksin komencis rakonti pri Koĉnev; Petro kapjesis, ne aŭskultante, ordonis al Franco Teodoroviĉ mallevi la ŝipon sur la akvon. Timoteo Koĉnev staris malproksime, rigardis, kiel la konstruitan de li «Marson» je la prua parto oni alligas per ŝnurego al fostoj, kiel oni elbatas el sub la kilo lignoblokojn kaj forigas nenecesajn apogilojn. La holanda maljunulo Brandt kun riverenco donis al Timmerman hakilon kun longa tenilo. Ievlev, kolere ekrigardinte en la okulojn de Franco Teodoroviĉ, interkaptis la hakilon kaj vokis Koĉnev-on. Koĉnev sen hasto aliris, sed Franco Lefort kriis, ke surakvigi la ŝipon devas la granda ŝipestro, kaj Petro Aleksejeviĉ aliris al la ŝnurego, kiun necesis dishaki.

— Vi komandu, — ordonis Ievlev al Koĉnev.

Koĉnev per laŭta gaja voĉo kriis al kampuloj, starintaj prete:

— Apogilojn for!

La kampuloj batis per lignaj martelegoj, lastaj apogiloj elsaltis el sub la ŝipkorpo, la ŝipo per tuta sia pezo kuŝiĝis sur la glitilojn, la ŝnurego streĉiĝis kiel kordo, Franco Lefort kun botelo da malvazio aliris la ŝipon per dancantaj paŝoj, frakasis la botelon je la antaŭkilo, diris kun riverenco:

— Nomo via, ŝipo, estos «Marso», navigu feliĉe dum multaj gloraj jaroj...

Koĉnev svingis la manon, kriis al la caro:

— Haku la ŝnuregon!

Petro Aleksejeviĉ batis svinge fojon, duan, trian, la ŝnurego kun krako krevis, «Marso» malrapide ekrampis sur la glitiloj en la akvon, pelante antaŭ si altan ŝaŭmon. Petro, pala pro emocio, ankoraŭfoje kisis Timmerman-on, brakumis Lefort-on, Apraksin-on, Ievlev-on. Sur la ferdeko de «Marso» jam estis saltanta Jakimo Voronin, kriante feliĉe:

— Flosas! Je Dio, ĝi flosas! Ŝipo!

Baldaŭ al la lago venis trajno de carino Natalia. Petro renkontis ŝin kun timida tenero — tiel nekaraktera por tuta lia aspekto. Sed tuj, kvazaŭ forgesinte, li ekkuris sur «Marson» por rigi ĝin, kaj ordonis al Ievlev esti konstante ĉe la patrino.

Silvestro Petroviĉ aliris, riverencis. Natalia Kirilovna rigardis al li silente, severe. Malantaŭ ŝia dorso estis interflustrantaj kortegaj superaj bojarinoj, malaprobante la neptunajn amuzojn, timis malvarmumon sur la lago, humidecon pro la akvo, estontan pluvon. La carino subridis per anguleto de la fortikaj, ankoraŭ junaj lipoj, diris al Ievlev tiel, ke la bojarinoj ne aŭdu:

— Hu, ratinoj tedaj! Kial ili iradas post mi, kial trudiĝas? Pro ili ankaŭ Peĉjo min ne ŝatas...

Ŝi ekridis al Silvestro Petroviĉ mallaŭte, kiel al malfremdulo, kaj komencis demandi, kiel fari, ke Petro Aleksejeviĉ promenveturigu ŝin en la ŝipo sur la lago. Ievlev malrapidis respondi, ŝi atendis, kaj kvieta rideto plu tremis en la anguleto de ŝiaj lipoj, kaj la malhelaj, kvazaŭ kun oro, okuloj rigardis al la ŝipo — serĉis Petron.

Vespere Ievlev diris al Apraksin:

— Kiom simpla en traktado estas carino Natalia Kirilovna kaj kiom ŝi ne similas al niaj orgojlaj bojarinoj...

Teodoro Matejeviĉ subridis:

— Ke ŝi estas simpla — tio estas vero. En Smolensko ŝi en bastoŝuoj iradis, kiam Nariŝkin servis kiel kapitano[37].

En tiu ĉi nokto estis drinkite: je la ŝipistoj, je princo Teodoro Jurijeviĉ Romodanovskij, je ferdekestro Silvestro Ievlev, je ekscelenca sinjoro Patriko Gordon, je la cara amiko ĝenevano Franco Lefort, je fremdlanda gasto ŝipestro kaj negocisto Jan Urquhart.

Ili sidis en la nova palaco ĉe la nova varfo. Vento de la lago movetadis la malhelajn harojn de Petro Aleksejeviĉ, levadis buntan tablotukon, buklojn de la peruko de Urquhart... Gardante sin de trablovo, surĵetinte sur la grasajn ŝultrojn broditan sur la brusto kaftanon, ŝipestro Urquhart rakontadis amuzajn historiojn: pri navigadoj en foraj maroj, pri profitoj, kiujn donas al ŝtatoj ŝipoj, pri piratoj, pri kuraĝo de eskortantoj, pri kruelaj maraj ŝtormoj, pri terura reĝo de balenoj...

— Ne kredu al li, bravuloj! — subite kriis ebria Patriko Gordon. — Li estas mensogul', jes, tiel! Li mem, hundaĉo, vendis sin al piratoj. Li estas malbono, mi scias, vi ĉion ne scias — stultulo!

Jam mateniĝis, la festeno plu daŭris. Multaj ŝipistoj, elturmentiĝinte, jam dormis ĉi tie sur benkoj. Petro Aleksejeviĉ, sobra, malgaja, iradis sur remparo sur siaj longaj kruroj, dirante al Apraksin:

---

37 Carino Natalia Kirilovna estis filino de etnobelo Kirilo Nariŝkin.

— Perejaslavlo, Perejaslavlo, sed kio estas en ĝi bona — en nia lago? Ĉu sonhorloĝo? Nu, ni konstruis ŝipojn, kaj kie ni navigu? Solaj malprofundaĵoj, indan venton ne eblas ĝisatendi, kiom longe ni ĝin atendos? Floto...

Teodoro Matejeviĉ silentis.

— Eĉ kokino ne dronos, — diris Petro, — eĉ horo ne pasas sen surgrundiĝo. Jen ŝipestro Urquhart rakontas, kiele homoj en maron iradas, sed ni?

Urquhart, kliniĝinte antaŭen, estis avide aŭskultanta.

— Necesas, Siro, al la Blanka maro veturi, en Arĥangelskon! — nelaŭte diris Ievlev. — Mi ĉi-vintre Onegon atingis, rigardis al pomoroj, kiajn ili ŝipojn konstruas, tie estas floto...

Ŝipestro Urquhart ekridis, eksvingis la manojn al Silvestro Petroviĉ. Petro ĵetis maltrankvilan rigardon al la ŝipestro, al Ievlev, kolere grumblis:

— Ĉu vi kaj mi multe scias la ŝipan metion, por juĝi. Onego! Fiŝistoj, verŝajne, fiŝkaptas, jen la tuta afero...

Kaj ordonis al ĉiuj iri dormi — por morgaŭ estis fiksitaj manovroj por la perejaslavla floto. Sed subite li postkriis al Apraksin:

— Haltu, atendu...

Teodoro Matejeviĉ revenis.

— Estas sciate de mi, ke kelkajn vi librojn latinajn legas kaj pri ili diskutas. Pri kio estas tiuj libroj?

Apraksin, paliĝante, rigardante en la okulojn de la caro, respondis:

— Ĉu vere Baĉjo Rĵevskij tiom mense malriĉas, ke li ne komprenis, kiaj estas tiuj libroj?

Petro, subite ridetinte, klakis la frunton de Apraksin per la fingroj, demandis ankoraŭ:

— Do, kiaj estas tiuj libroj?

— De Koperniko kaj Keplero, Siro.

— Pri kio?

Teodoro Matejeviĉ rakontis, pri kio.

— Por kio sekrete?

— Ni gardas nin de la popoj, Siro. Kaj ankaŭ de iuj aliaj — por ne konfuzi!

— Nu, iru dormi! — abrupte ordonis Petro.

Kaj ree komencis paŝadi en la ĉambro.

Ekde la mateno ĉio ekiris malglate. Baĉjo Rĵevskij, malgraŭ ĉiuj penoj komplezi la rotestron per sia sagaceco, estis dufoje batita, eĉ feroce, kaj iomete pli poste estis degradita al matroso. Jakimo Voronin ricevis nukbaton, Ievlev elaŭskultis insulton, la kuŝemulo Prjaniŝnikov en nekonvena tempo base ekridegis — kaj ricevis piedbaton. Sinjoro Romodanovskij Teodoro Jurijeviĉ, promociita al generalo, ordonis bastonbati Lukov-on pro mokemo en ties rigardo. La fremdlanda ŝipestro Urquhart, ĉirkaŭvolvinte la kapon per ŝalo, por ke ne bruligu la suno, ridetis al tio, kiel oni bastonbatas Lukov-on. Apraksin, blanka kiel papero, kun angoro diris:

— Prefere morti, ol vidi tion...

Poste estis aranĝita solena tagmanĝo sur la admirala ŝipo. Al

Romodanovskij, por nemalgranda plezuro de la ludsoldatoj, tiel ŝvelis la vango pro denta malsano, ke li ne nur manĝi — eĉ trinki povis nur kun grandegaj suferoj. Post la tagmanĝo la tuta perejaslavla floto salutadis al la admirala ŝipo kaj prezentis manovrojn: la flotanoj atakis la Butirkan regimenton, kiu kvazaŭ dormis en la arbaro, kaj la ŝipoj alvenis kaj de sur la bordo frakasis la tutan regimenton. Sed ĉar la butirkanoj ne tre bone komprenis, kio de ili estas postulata, do ili koleriĝis pro venkaj krioj de la flotaj maristoj kaj iun grave kripligis. Plej multe ricevis Teĉjo Prjaniŝnikov, kaj Ievlev-on fortika knabego el butirkanoj dronigadis en la lago, ĝis kiam Silvestron Petroviĉ-on liberigis aliaj flotanoj. Francon Teodoroviĉ-on Timmerman-on, irintan por dormeti en malvarmeto, butirkanoj opiniis gvatanta spiono, kaj en batalo preskaŭ elartikigis lian makzelon, post kio li tiom longe fuĝadis, ke troviĝis nur post tagnokto. Pro malvigleco Jakimĉjo Voronin estis batita de Petro Aleksejeviĉ trian fojon, — jam «nete», kiel esprimis Jakimo mem post la tria draŝo.

La batalon ŝipestro Urquhart laŭdis kun subrido. La subridon Petro Aleksejeviĉ ne rimarkis kaj ĉiujn favore traktis — kaj la butirkanojn kaj la flotanojn. Dum la tuta nokto en kula zumado oni riparadis la ŝipojn, kripligitajn de la butirkanoj, kaj ekde la mateno, sen matenmanĝo, ree aranĝis velajn kaj kanonajn manovrojn. Kiam vento malfortiĝis, la flotanoj parkerigadis registrojn de ŝipa ekipaĵo, balbutadis nekompreneblajn vortojn:

— *Steng-zeil*.

— *Kruis-bram-ra*.

— *Onder-zeil*[38].

Ili mallaŭte interridadis. Lukov deziris demandi: ĉu ekzistas rusaj nomoj por ĉiuj ĉi kruisoj kaj onderoj, sed ne kuraĝis. Kiam ili memorfiksis la lecionon, al Apraksin estis ordonite rakonti, kio estas floto, kaj ankaŭ flota admiralo, vicadmiralo, *schout-bij-nacht*[39], flagŝipo, *schieman*[40], *Zeugmeister*[41]. Teodoro Matejeviĉ rakontis, lin anstataŭis Ievlev — paroli, pro kia neceso tenas reĝoj-potenculoj ŝipajn flotojn kaj kia estas destino de flotoj en militoj. Petro Aleksejeviĉ aŭskultis lin avide, kapjesadis, laŭdadis, poste ekdisputis pri la hieraŭa batalo, frapis per la pugno barelon, ekparolis abrupte:

— Fortresoj, kiuj sur seka vojo troviĝas, ĉiam anticipe pri malamika alveno scii povas, ĉar granda tempo por piedira kaj surĉevala armeo necesas. Sed se fortreso estas ĉe maro, tiam floto devas alveni nesciate, kaj scii pri ĝi en la fortreso oni ne povas, kiel homo ne povas scii pri sia morto. Ni hieraŭ estis batitaj pro tio, ke la kontraŭulo sciis: ni iras. Kaj tio estas malbona...

Poste ree estis manovroj, kaj nokte ili kalfatris novan ŝipon.

Petro Aleksejeviĉ kalfatris kun Timoteo Koĉnev kaj senĉese konversaciis kun li. Sed Jan Urquhart flankenigis la ŝipmajstron, enŝoviĝis en la konversacion, iradis apud la caro laŭlonge de la ŝipo, babiladis siajn historiojn.

Ievlev pasis pretere, skuis la ŝultron: tro proksime estis

38 En la nederlanda: topvelo, krucbramjardo, subvelo.

39 Malnova nederlanda rango de supera mara oficiro, proksimume egala al subadmiralo (kontradmiralo).

40 Malsupera suboficiro, responsanta pri velaro kaj ŝnuraro (el la nederlanda).

41 Artileriestro (el la germana).

alŝoviĝanta al Petro Aleksejeviĉ la fremdlanda ŝipestro.

Tiel en sendormaj noktoj ili eltenis ankoraŭ kelkajn tagnoktojn, poste subite falis dormi meze de tago. Ili dormis longe — kaj la ŝipistoj, kaj la butirkanoj, kaj eĉ la Vologdaj kampuloj, kutimiĝintaj al la vivo sur la lago. Estis varmege, sufoke, estis proksimiĝanta fulmotondro, sed neniel povis veni. Kaj la dormo estis peza, kiel ĉiam en sufokeco antaŭ fulmotondro.

Ili vekiĝadis, trinkadis kvason, kiun estis ordonite elmeti en bareloj; ŝanceliĝante, lacigitaj de sufokeco, vagadis sub arboj, oscedadis kaj denove faladis sur densan herbon, por ankoraŭ forgesiĝi, ĝis vekos la rotestro.

Sed Petro dormis profunde.

En sufoka varmega silento, levante polvon, sur arbarkampeton elkuris bruna virĉevalo. Menŝikov deĉevaliĝis, ĉirkaŭrigardis, per piedbato vekis ronkantan kampulon, demandis:

— Kie estas la caro?

— Ki-u?

— La caro, Petro Aleksejeviĉ...

La kampulo gratis la bruston, turniĝis sur la flankon, ree ekronkis. Aleksandro Daniloviĉ viŝis polvon kaj ŝviton de sur sia vizaĝo, trairis laŭ la bordo, balancis la kapon: «Nu, bravuloj, kiom konstruis, la lago ne rekoneblas!»

Sur la bordo sidis blankhara knabo, fiŝkaptadis ekdormetante. Aleksandro Daniloviĉ ankaŭ lin demandis — kie estas la caro.

— Ja li dormas — jen tie! — diris la knabo.

Menŝikov eksidis sur la herbon apud Petro Aleksejeviĉ, skuis ties ŝultron. Tiu dorme ŝmacis per la lipoj, forsvingis lin, kvazaŭ muŝon. Aleksandro Daniloviĉ skuis ankoraŭ foje.

— Kion? Por kio?

Li malfermis la okulojn, rekonis, frotis la vizaĝon per la peĉkovritaj polmoj, dolĉe oscedis:

— Kia dormo, Aleksaĉjo...

Menŝikov diris kun suspiro:

— Tempas iri al Moskvo, Petro Aleksejeviĉ. Presburgo pretas al batalo. Enuas la homoj en atendo, elturmentiĝis.

Petro Aleksejeviĉ, strabante per la malhela okulo, per grandaj glutoj trinkis malvarman kvason el argila kruĉeto. Surmetis la kruĉeton, tiris sin:

— Bone do, ni ŝanĝu Neptunon al Marsaj amuzoj.

Kaj leviĝis.

Tiris dormantan Ievlev-on je la kaftano; ne atendante, kiam tiu vekiĝos tute, diris:

— Al Moskvo mi veturas, Silvestro. Vi ĉiuj ĉi tie — manovrojn daŭrigu senĉese, kun granda diligenteco. Dormu malmulte, laboru multe. La ŝipon «Jupiteron» sen mi ne surakvigu.

Li ankoraŭfoje tiris la kaftanon kaj, infanece elstariginte la lipojn, kisis al la vango:

— Adiaŭ! En mia ĉambro, kio estas sur la tablo lasita — kaŝu.

La suno jam estis subiranta. Preter dormemaj gardantoj Ievlev eniris en la palacon, en la dormoĉambron de Petro Aleksejeviĉ, kunmetis surpergamenajn desegnaĵojn en stakon, inter la desegnaĵoj trovis folieton, malnetan aŭ nefinitan leteron de Petro al Natalia Kirilovna. La okuloj per si mem kaptis skribaĉon: «...kaj mi pretas esti, sed, vere, estas afero — niajn ŝipojn finkonstrui... via fileto, troviĝanta en laboro...»

Elirante, en krepusko li renkontis Apraksin-on. Tiu kun rideto rakontis pri severa adiaŭo de Petro kun la denuncanto Rĵevskij. Baĉjo falis al la piedoj, plore petegis pri pardono, ke kvazaŭ tro malfacilas la matrosa servo, super liaj fortoj; la rotestro senvorte forturniĝis kaj enseliĝis, kvazaŭ ne aŭdante la lamentojn de la nobelido.

Silvestro Petroviĉ respondis morne:

— Li pardonos post ioma tempo. Pardonos, alproksimigos, favoros. Estos Baĉjo en honoro, rememoru mian vorton, Teodoro Matejeviĉ...

7. Batalo

Al la lago informoj venadis malfrue. Kun prokrasto la ŝipistoj eksciadis pri grandaj amuzaj bataloj apudmoskvaj, pri tio, ke Petro Aleksejeviĉ kondukas regimentojn, mem pafas el kanonoj, ke en Aleksandra fortreso kripliĝis generalo Schommer, mortis pro vundoj ludsoldato Zubcov, Sirotin estis brulvundita per pulvo, Luzgin rompis la kruron.

Apraksin ĉe la lago balancadis la kapon, subridadis:

— Tio estas bona amuzo. Ankaŭ ni ne maldiligentu. Ni

laboras tage kaj nokte, sed tutegale ne sukcesas fari ĝustatempe. Estos ankaŭ ĉe ni granda batalo, necesas hasti...

El Moskvo al Perejaslavlo-Zalesskij de tempo al tempo venadis ludsoldatoj — basvoĉaj, fortikaj knabegoj kun forte kreskantaj barboj — «por lerni Neptunajn amuzojn», — tiel estis ordonite vorte transdoni al Ievlev de Petro Aleksejeviĉ.

Kun timeto ili enpaŝadis sur la ŝipajn ferdekojn, krucosignadis, kiam alflugadis vento, longe ne deziris grimpi sur mastojn por fiksi velojn. Jakimĉjo Voronin, bone memorfiksinta, ke en la heredan bienon li nun, kaj ne nur nun, sed ankaŭ poste, ne trafos, koleradis kontraŭ laborevituloj, kuradis nudpieda, kun haŭto, deskvamiĝanta pro sunbruligo, akiris skurĝon por bati. Bojaraj infanoj skribadis al la gepatroj amarajn leterojn, la favorkoraj patrinoj sendadis al Perejaslavlo donacojn por «la kolera *schout-bij-nacht*» Voronin. Jakimo formanĝadis la donacojn kaj eĉ pli peladis la bojaridojn.

— Ĉu ne ŝatas vi sur mastojn grimpi? — kun gaja furiozo demandadis li korpulentan junan nobelidon. — Ne plaĉas? Ankaŭ al mi, fraĉjo, ne plaĉis, sed vidu — servo, necesas... Grimpu, ne timu, se vi pereos — ni sepultos honore...

Lukov amikiĝis kun Koĉnev, komencis diligente lerni la ŝipan metion. Dum la aŭtuno kaj vintro li sukcesis repacigi Voronin-on kun la ŝipa majstro. Jakimo, ridante, diris foje al Ievlev:

— Jen kiaj tempoj venis: ni laboras, kvazaŭ ne estas de nobela deveno. Jen mi, jen Koĉnev — rezulte estas la sama stato. Ambaŭ estas laborantoj... Kaj pri la nobelidoj... ho Dio, iru ili ĉiuj al diablo! Kiam venos la rotestro, mi riverencos al liaj piedoj — li sendu kiel matrosoj pomorojn, sed ne ĉi

karnodikulojn...

Petro alveturis nokte kaj tuj ordonis al la floto prepariĝi al granda amuza batalo. Apraksin estis nomumita estri la ŝipon «Marso», «Neptunon» devis komandi Voronin. Post batalo de la ŝipoj kaj la venkinton kaj la venkiton devis ataki la butiranoj de Gordon kaj preni la ŝipojn de sur malgrandaj barkoj, boatoj kaj eĉ flosoj — per sturmo. Super la sturmaj soldatoj la rotestro ordonis, ke «la komandon prenu sinjoro Ievlev, por ke ili havu avantaĝon super ĉiuj ceteraj militistoj».

Patriko Gordon invitis Ievlev-on en sian tendaron por konversacio. Ili sidis ĉe bierkruĉoj en pavilono kaj nehaste pripensadis, kiel ataki, en kiu tempo, el kie eliru la malgrandaj sturmaj boatoj. Gordon trempadis en la kruĉon biskoton, diligente maĉadis ĝin per la ankoraŭ firmaj dentoj. En la konversacio li ne ŝercis, estis videble, ke nenion gajan li atendas de la okazontaĵo...

— Nu, kiel vi fartas ĉi tie, bravulo? — demandis li, kiam ili priparolis la aferojn.

— Ni laboras iel-tiel.

— Kion signifas — iel-tiel?

Ievlev klarigis.

— Jen kion signifas — iel-tiel. Jen tiel.

— Kaj — Latino?

Silvestro Petroviĉ plendis, ke Latino estas malfacila.

— Malfacila — jes, — konsentis Gordon. — Sed por vi necesa, bravulo. Tre necesa. Se vi mem scios — tiam nin oni tute sen...

Kaj li balancis sian longan kruron, kvazaŭ piedbatante nenecesan homon. Liaj okuloj rigardis severe, la longa, pala vizaĝo estis esprimanta malestimon.

— Ĉu fremdulojn forpeli? — miris Ievlev.

— Jes, bravulo. Ŝipestro Urquhart for, mi scias...

Li enpensiĝis, suĉante la pipon, kun fiero kaj malestimo rigardante super la kapo de Ievlev. Poste li nehaste leviĝis per tuta sia seka, muskola korpo kaj foriris dormi en malvarmeton, sub betulon, trans la pavilonon...

Petro Aleksejeviĉ estis kvieta, pensema, demandadis multon de Apraksin, ne komandadis mem. Al peto de Voronin doni pomorojn kiel matrosojn li respondis kun subrido:

— Tiuj, verŝajne, ankaŭ sen vi estas matrosoj, sed tiujn ĉi ŝtipojn kiu instruos?

Voronin foriris.

Petro de sur la kabo Gremjaĉij rigardadis per lorno al ŝipaj manovroj, fojfoje malpacience mordadis la lipojn, sed ne insultis. Rimarkinte Ievlev-on, li manvokis tiun al si, demandis:

— Kies folioj al mi estis metitaj en la dormoĉambron? Kaj en la pasinta jaro oni metis kaj nun. Kiu ilin alveturigas, de kie?

— Ĉu pri la ŝipa metio?

— Pri Olegaj kompanioj kaj pri Konstantinopolo.

— Prenitaj el la Ambasada kancelario, Siro, de la estro Poluektov.

— Redonu ilin reen. Se ankoraŭ estas io pri la ŝipa metio —

alveturigu ĉi tien, metu al mi.

Kunŝovante la lornon, li ekparolis nelaŭte, penseme:

— Monaĥejestroj, kaj episkopoj, kaj arĥimandritoj konsilis al Johano, kiam li ilin pri Livoniaj urboj demandis, por tiuj urboj stari firme, indulgante nek militistojn, nek propran vivon... Ĉu vi aŭdis pri tio?

— Aŭdis.

— Mensogas vi!

Ievlev silentis.

— Se ne mensogas — diru, kiel tio estis...

— La Livonia tero ekde Jaroslavo Volodimiroviĉ ĉiam estis nia, sinjoro rotestro. Se ni ne staru por tiuj Livoniaj urboj, per nia sango priverŝitaj, tiam estos el ili por ni granda minaco, kaj ne nur por Jurjev, sed eĉ por Granda Novgorodo mem kaj Pskovo...

— Sen floto, sen ŝipoj ĉu eblas tiujn terojn almiliti? Diru?

Ievlev silentis iom, poste respondis:

— Ne, ne eblas.

Petro malgaje ekridis, almontris per la pipo la lagon, kriis:

— Kaj ĉu kun tiuj ĉi eblas? Kun tiuj ĉi — iru, militu! Ĉu vi iros, se mi sendos?

Kaj forturniĝis, ĝibetiĝinte.

Post ne pli ol horo okazis draŝado kaj skoldado al Teodoro Ĉemodanov. Esperinte, ke ĉiuj estas okupitaj per siaj aferoj, Ĉemodanov per malantaŭa vojo iris al vilaĝeto Veskovo por siaj amoraj aferoj, sed renkontiĝis kun la edzo de sia amoratino

kaj estis tiel batita, ke apenaŭ sukcesis atingi ŝedon kun ŝipaj provizoj, kien lia amiko Prjanišnikov alportis al li vodkon kaj kompresojn. Ĉemodanov trinkis la vodkon kaj ekdormis. Malfeliĉe Petro Aleksejeviĉ ordonis sonori alarmon, kaj mem enkuris en la ŝedon por preni forgesitan pulion, kie li ekvidis la ŝvelintan kaj bluiĝintan monstron — Ĉemodanov-on.

Batalo de «Marso» kun «Neptuno» daŭris dum tuta tago. Dufoje la ŝipoj kunpuŝiĝis kaj dufoje disiris. Jakimo Voronin, tuta ŝirita, kvazaŭ freneziĝinta diablo, kuradis sur sia ŝipo, interbatadis, grimpadis sur mastojn, pafadis el kanonoj, kriadis en paroltubon netolereblajn insultojn al Apraksin kaj ĉiel ofendadis lin pro tio, ke tiu ne povis venki lin. Teodoro Matejeviĉ tenis sin kun modesta digno kaj atendis sian tempon, por ke la vento permesu ekbatali vere. Tiu tempo venis vespere, kiam Jakimo, elturmentita de bolado de la propraj fortoj, falis sur la pobo por iom dormi. Kaŝe, en silento, «Marso» aliris al la ronkantaj ŝipanoj de «Neptuno», kroĉis per hokstangoj la ŝiprandon, kaj tiam okazis batalo — certe, kun plena venko de Apraksin. Sub ridego kaj gajaj krioj de la sturma skipo de «Marso» sinjoro Voronin mem estis ligita per ŝtofzonoj kaj kondukita al juĝo de Petro Aleksejeviĉ, kiu el siaj manoj donis al la suferanto glason kaj ordonis al la kaptito resti ĝis la fino mem de la batalo sur la ŝipo «Marso» en la holdo, pro tio, ke li preterdormis Apraksin-on.

La venkintoj ricevis barelon da malnova medo, sed Teodoro Matejeviĉ ordonis ne malkovri la barelon, timante atakon de la butiranoj. Vespere la ĉielon kovris nuboj, iĝis malvarme, ekŝutiĝis malgranda pluveto. Sur «Marso» estis estingitaj lumoj, patrolantoj iradis laŭlonge de la ŝiprandoj,

fiksrigardante mallumon.

Patriko Gordon en kiraso sub mantelo malrapide promenadis sur la bordo apud siaj malgrandaj ŝipoj. Sur barkoj, flosoj, en boatoj senmove sidis la butiranoj. Ĉiu havis hokstangon, kelkaj — eskalojn, por ĵeti sur ŝipon. Al «Marso» fine de la nokto moviĝis la Gordona grupo — ĝi staris ĉe la ankroj. Sed kiam la ŝipanoj ekaŭdis plaŭdadon de remiloj, ili levis velon kaj foriris kun favora vento, kvazaŭ dissolviĝis. Ili foriris en mallumo kaj sen timo de perfidaj malprofundaĵoj: Apraksin bonege konis la lagon, sur kiu li navigadis dum tiom da tempo.

Gordon koleriĝis kaj ordonis atingi, sed tiam trafis al iranta el trans kabo per ĉiuj veloj «Neptuno», komandata de Lukov. Ievlev la unua ekvidis la malamikan ŝipon, sed ĉesigi la konfuzon ne sukcesis. «Neptuno» per la flanko batis grandan floson kun butiranoj, la homoj ŝutiĝis en la akvon kaj komencis kaptadi barkon, por ne droni, sed la barko renversiĝis kaj jam pli ol cent homoj iĝis en la akvo. Ievlev penis starigi ordon, sed nenio fareblis: Gordon konfuziĝis kaj nur kun insultoj batadis la manojn de dronantoj, kiuj kaptadis lian boaton. De sur «Neptuno» pafis kanono, kaj Lukov demandis el mallumo:

— Ĉu sufiĉas, aŭ ni plu militu?

Gordon kun kolero ekkriis:

— Dronigu min ĉi tie por ĉiam, sed venkon vi ne havos... Prefere morto, bravulo, diablo!

Butiranoj, ĉiu kiel povis, naĝe atingis la bordon, kelkaj petis savon, sed neniu atentis. En komenciĝanta mateniĝo aperis «Marso», iranta al la grupo de Gordon, por pripafi ĝin el

kanonoj.

— Kapitulacu, Gordon! — kriis Apraksin en la paroltubon.

Kaj Jakimĉjo Voronin, elirinta el sia malliberejo, kriis per speciale fia voĉo:

— Sinjoro generalo, kian vi havas opinion pri viaj fortoj en tiu ĉi batalo?

— Jen mi al vi montros fortojn! — furiozis Gordon...

Frumatene la boato de Gordon renversiĝis, kaj la skoto en sia armaĵo kiel ŝtono ekiris al la fundo. Ievlev, deŝirante de si la kaftanon, ĵetiĝis post la generalo, mallerte kaptis lin je la peruko, — la peruko restis en la mano. Necesis plonĝi duan fojon. La generalo estis eltrenita sur la ferdekon de «Neptuno», li rigardis per freneziĝintaj okuloj, hikadis, el lia buŝo fluis akvo. Silvestro Petroviĉ kun Apraksin kaj Lukov malleviĝis en boatojn por serĉi dronintojn, eltreni tiujn, kiuj ankoraŭ tenis sin sur la akvo. Sur la bordo brulis lignofajroj — butiranoj estis sekigantaj siajn kaftanojn, botojn, vindgamaŝojn.

Pluvo ĉesis, sed la mateno estis malvarma, de sur arboj estis falantaj malsekaj flavaj folioj. Multaj homoj mankis, iliajn korpojn oni serĉis per hokstangoj en la lago, sed ili troviĝadis unu post alia jen sur «Marso», jen sur «Neptuno», jen sur malgrandaj ŝipoj, jen sur la kontraŭa bordo, jen ĉe la baterianoj sur Gremjaĉij.

Petro, gaja, ordonis ĉiujn, kiuj vivas, drinkigi ĝis ebrio, kaj kiuj mortis en la batalo — prifunebri dece; li mem plenigadis kruĉetojn, staris, brakuminte Apraksin-on, ridadis, laŭdadis, mallaŭdadis, rememoradis ĉiujn peripetiojn de la batalo.

Nur matene Ievlev revenis en sian kabanon: kiel en sonĝo,

ekvidis sur la forno, sub peltmantelo, kun vindita kapo Baĉjon Rĵevskij-on.

— Kial vi ĉi tie? — kun kolero demandis Silvestro Petroviĉ.

— Per febro ekmalsanis... — per sufera voĉo respondis Rĵevskij.

— Kaj la manovrojn ne vidis?

— Mi diris, per febro mi ekmalsanis...

Silvestro Petroviĉ, insultinte, komencis ŝanĝi la veston al la seka. Li tremegis, deziris trinki, sed por leviĝi de la benko mankis fortoj. Cara kuracisto von der Gulst balancis la kapon — forte tordita estas la tablestro, ĉu postvivos? Li ordonis kuŝi sub varma kovrilo, preni kuracilojn, forpeli el la kapo ĉiujn pensojn — kaj malbonajn kaj bonajn. Iom poste viziiĝis Petro Aleksejeviĉ, kiel li karese konversacias kun Rĵevskij, kiel tiu plendas al li, ke malvarmumis sub vento dum la batalo. Silvestro Petroviĉ eĉ oĥis pro miro, tiam Petro alsidiĝis al li, demandis:

— Ĉu ankaŭ vi, Silvestro, ekmalsanis?

Ne atendante respondon, li ordonis rakonti, kion li vidis vintre sur Onego. Silvestro Petroviĉ kun peno koncentriĝis, ekparolis. Petro aŭskultis longe, atente, kapjesadis per nekombita, hirta kapo. Lia malgranda buŝo estis firme kunpremita, la okuloj rigardis for — tien, kie trans la malfermita fenestro trankvile spiris la lago. Poste subite sur la loko de Petro Aleksejeviĉ aperis Apraksin:

— Pro Dia volo naskiĝis ni, vi kaj mi, Silvestro, en malfacila, peniga tempo. Ĉu longe ni vivos? Por kio ni vivu?

Ievlev penis kompreni, pri kio parolas Apraksin, sed estis komprenanta ne ĉion. Teodoro Matejeviĉ sidis sur la benko ĝibetiĝinte kaj kvazaŭ pensis voĉe.

— Do, finiĝis nia juneco... Estis infaneco, kiam la ludsoldatoj pafadis el bastonoj. Estis ankaŭ adoleskeco, kiam ni trovadis feliĉon en sonoj de muskeda pafado. La juneco kun ludaj sturmoj kaj tamburbatado, kun ŝipkonstruado ĉi tie — forpasis por ĉiam. Ne plu bezonas ni muskedojn kaj arkebuzojn, rabotitajn el bastonoj. Nia lago estis bona por infanaj amuziĝoj de la rotestro, sed nun ĝi por li estas enua... Antaŭnelonge Lefort, pro sia ĉiama emo diri agrablaĵon, nomis venton de nia lago — gaja vento. Mensogis la germano! Tiu vento ne gajigas la animon, ĝi loĝigas en ni, venenitaj per revo pro vera mara vastaĵo, nur senton de nesatigebla sopiro. La multvortema Koort diris al mi foje, ke sur nia lago lia koro sangas, ĉar lin, mariston, plenigas rememoroj pri aliaj akvoj, pri veraj ŝtormoj...

Silvestro Petroviĉ superis la malsanon, leviĝis sur la kubuto. Apraksin daŭrigis penseme:

— Tra flatado de fremdlandanoj, tra mensoga admiro de hipokrituloj Petro Aleksejeviĉ aŭdas indulgon de plenaĝulo al amuzoj de infaneto. Nu, kaj komprenis li, ke lia floto ne estas floto, ke lia maro ne estas maro, ke liaj ŝipoj ne estas ŝipoj. Nia Perejaslavla lago gajigis kaj ĝojigis la Siron, dum li vidis en ĝi oceanon. Sed nun li vidas en ĝi nur flakon. Nun la penso pri la Blanka maro eĉ por minuto ne forlasas lin. Antaŭ duonhoro, elirante de vi, diris li al mi firme, ke li prepariĝos veturi al Arĥangelsko.

Silvestro Petroviĉ faris penon eksidi.

— Ĉu hodiaŭ?

— Hodiaŭ, kaj urĝe. Pri la lokaj ŝipoj li nenion plu diras. Al Timoteo Koĉnev li ordonis reveni hejmen — atendi lin tie. La kampulojn — al la vilaĝoj, el kie ili venis. La katenitojn — en malliberejojn.

— Sed la palaco? La baterio? Kaj nia floto, Teodoro?

— Ĉio ĉi finiĝis, Silvestro. Ni ne plu pafados el muskedoj, eltornitaj el lignaĵo. Finiĝis la juneco. Nu, ripozu, amiko kara, dormu, poste ni vidos...

Vespere Petro Aleksejeviĉ ordonis sonori alarmon. Li elirigis per siaj manoj «Marson» sur profundan lokon, sulkinte la frunton ĉirkaŭrigardis sian palacon kun blanka pordo, kun aglo sur la tegmento, ĉirkaŭrigardis la domon, konstruitan por Gordon, staplojn, ŝedojn, mastojn de aliaj ŝipoj. Atente ĉirkaŭrigardis la ŝipestrejon, la ĉarpentejon, kie li mem kaj rabotis, kaj segis, betulojn, la kabon Gremjaĉij, la albordiĝejon sur fostoj...

La homoj kviete atendis ordonon. La junaj nobeloj ĝojis — la laboro finiĝis, ni rajdos al la bienoj, manĝos kaj dormos ĝissate. Subite la caro demandis de Lukov:

— Sinjoro admiralo! Kio estas fronttopvela ŝnuro?

— Fronttopvela ŝnuro estas rigilo, levanta la fronttopvelon, — bojis Lukov.

La nobelidoj maltrankviliĝis — ĉu ĉio revenos al la komenco? Sed plue Petro Aleksejeviĉ nenion demandadis — ordonis iri al la bordo. Kaj jam ne plu ĵetis eĉ unu rigardon al la lago, kie tiom da tempo estis pasigita en laboroj, kie eĉ morton vidis la estontaj maristoj, kie pasis tiom da ĉio — kaj malbona

kaj bona.

Sur la bordo kun Patriko Gordon li surĉevaliĝis kaj forveturis al Moskvo.

La ludsoldatoj staris amase kaj senvorte.

Teodoro Matejeviĉ akompanis Petron per rigardo, silentis iom, poste ordonis al ĉiuj, kiuj deziros, veturi al Moskvo.

— Sed se al la bieno? — demandis la alta Prjaniŝnikov.

— Por kio?

Prjaniŝnikov silentis, timiĝinte pro la severa rigardo de Apraksin.

— Al Moskvo! — kriis Apraksin. — Ĉu vi komprenis? Kaj nenien krome!

8. Malsano

Silvestro Petroviĉ ne memoris, kiel oni alveturigis lin al onklo Rodiono Kiriloviĉ, kiel oni levis lin laŭ la ŝtuparo en la superan ĉambron, ne memoris, kiel pasis la somero, kiel venis aŭtuno. Kuracisto-germano balancadis sian maljunan grandorelan kapon — por ĉio estas volo de Dio, nur rusa sano povas venki tian febron. Pro la febro en la vejnoj de la sinjoro tablestro nun la sango treege densiĝis. Ordinare oni pro tio mortas, tamen necesas preĝi...

Maria Nikitiĉna ploradis kaŝe, sidante ĉe Silvestro Petroviĉ. Lian maldikan vizaĝon prikreskis maldensa hela barbo, fojfoje per la sekiĝintaj lipoj li prononcadis iajn vortojn. Manjo fiksaŭskultadis kaj nenion komprenadis.

— Delasu la ŝkoton, delasu!

Poste ŝi komprenis: li navigas sur sia lago, konstruas siajn ŝipojn, vivas tie, en Perejaslavlo, sed ne ĉi tie, en Moskvo.

Kaj tage, kiam li estadis speciale pala kaj flava, kaj nokte, kiam pro febro sur liaj vangoj brulis ruĝaj makuloj, fiksrigardadis Manjo en lian vizaĝon, demandadis sin, pro kio ŝi tiel ekamis lin? Kial ŝi ne deziras vivi, se li mortos?

Fojfoje al Rodiono Kirilovi ĉ alveturadis princo Ĥilkov. Ili, sidante malsupre, longe konversaciadis pri siaj manuskriptoj. Manjo mordadis tukon, — kiel povas ili okupiĝi pri aferoj, kiam Silvestro Petrovi ĉ estas mortonta!

Kaŝe de la onklo Manjo vokadis sorĉistinojn, tiuj flustradis super akvo, aspergadis la malsanulon, kovrinte lin per tuko, turniĝadis, farante sorĉadon. Manjo, kaj kredante kaj timante, rapide krucosignadis sin en la vestibleto, petegis sanktan Dipatrinon ne forlasi ŝin, orfinon, ne permesi al la sorĉistinoj pereigi Silvestron Petrovi ĉ-on.

En kvieta hela diafana tago de postsomero Silvestro Petrovi ĉ subite malfermis la okulojn, koncentris la pensojn kaj per solaj lipoj apenaŭ aŭdeble eldiris:

— Bonan tagon, Maria Nikiti ĉna.

Manjo kunfrapis la manojn. Kudraĵo falis de sur ŝiaj genuoj.

— Apraksin kie estas — Teodoro Matejevi ĉ?

— En Arĥangelsko ili ĉiuj estas, — diris Manjo, — kaj ankaŭ Petro Aleksejevi ĉ kun ili...

— En Arĥangelsko?

Al Manjo tremis la lipoj, en la okuloj brilis larmoj. Ŝi sidis senmove, firme kunpreminte la manojn ĉe la gorĝo.

— Por kio en Arĥangelsko?

Manjo ne sciis. Silvestro Petroviĉ pensis, kuntirante la brovojn. Poste li malforte ridetis kaj diris, ke li deziras dormi. Vespere li petis manĝi, kaj post semajno ekintencis preni ŝvitbanon. Por tia okazo estis vokita maljuna banisto el kaptitaj tataroj — malgranda, teruraspekta, lerta kaj glita, kiel diablo. La onklo rakontis al li, kia estis malsano, la tataro kapjesis per la razita kapo:

— *Jakŝi!*[42]

La kuracisto, ĉeestinta ĉe la interparolo, kaptis sian kapon: anstataŭ kuraco povus okazi morto.

La kancelariestro kraĉis, — kial mensogas la germano, kiam okazis, ke homo mortus pro bano? La tataro plu kapjesadis — *jakŝi, jakŝi*, montrante, ke li scias...

La banejo estis hejtita ekde la mateno — de la tataro mem kaj de lia helpanto, surdmuta, kun kromnomo Senaŭdulo. En tiliajn kaldronojn per same tiliaj siteloj estis portita «mola» akvo el malproksima puto. En bekkruĉoj la tataro miksis kvason — mintan kun herboj, por per tiu kvaso fari vaporon, kiam venos la tempo. Sur kuŝbretoj kaj benkoj Senaŭdulo disĵetis alportitan en sako fojnon, kun ĝiszona riverenco, krucosigninte sin, metis folifaskojn, faritajn de li mem. En betulbastaj skatoloj staris maltbiero kaj tatara vodko kun vinagro kaj abrotana herbo, por la lasta, facila vaporo.

Ridetante pri la serioza vizaĝo de la tataro, pri fervora riverenco de la Senaŭdulo, pri la tuta soleneco de la malgranda banejeto de la kancelariestro, Silvestro Petroviĉ kuŝiĝis ventre

42 Bone (en la tatara). *(trad.)*

sur la kuŝbreton, enspiris per la tuta brusto fortan kaj bonan odoron de la prisorĉita fojno kaj dolĉe ekdormetis, dum la lertaj manoj de la tataro tamburadis sur liaj skapoloj, dorso, ŝultroj. Senaŭdulo laŭ signoj de la tataro vaporadis per minta kvaso, tra la glimaj fenestretoj de la lanterno lumis kandelo, spiri iĝadis ĉiam pli varmege, la koro batis per egalaj potencaj puŝoj, pelis la sangon tra la korpo, la varmega aero favore vastigadis la bruston. Kaj la tataro jam dancis sur la dorso per siaj fortaj malgrandaj piedoj, gaje kaj vigle aldirante:

— Aj, jakŝi, aj-aj, jakŝi, aj, nu, jakŝi!..

Kaj ŝmacadis per la lango:

— Paf-paf-paf!

Kaj Senaŭdulo, trempante la folifaskojn en la sorĉita biero, jam estis vipanta de la flankoj al la ripoj, poste al la dorso, al la ŝultroj, al la kolo kaj muĝis ĝoje, kvazaŭ dirante, ke ĉio estos bona, ja ni nian metion scias, ni ja servos...

Subite malfermiĝis la pordo — kaj en la banejon enfalis Jakimo Voronin kaj Lukov. Ili venis por viziti la malsanulon, kaj tiu estas en la banejo, do, per tiu okazo ankaŭ al ili Dio ordonis varmigi siajn ostojn.

— Sed de kie vi venis? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— De la maro! Ni, fraĉjo, nun estas maraj ŝipistoj! — diris Lukov. — Nur hieraŭ ni revenis. Kio esti-is!

Interrompante unu la alian, ili komencis rakonti pri Arĥangelsko, pri tio, kiel konstruiĝas nun tie ŝipoj, kiel restis tie kiel vojevodo Teodoro Matejeviĉ Apraksin...

Voronin subite kunfrapis la manojn, kriis:

— Sed atendu, atendu, pri Baĉjo Rĵevskij ĉu vi scias?

Ievlev silente rigardis al Jakimo.

— Je Dio, li ne scias, je Dio! — ĝojis Voronin. — Li, infano, nun per la mano ne atingeblas. Li kiel vojevodo veturis en Jaroslavlon...

Silvestro Petroviĉ ne kredante forsvingis.

Ambaŭ — kaj Lukov kaj Voronin — komencis krucosigni sin, ke ili ne mensogas, alie ili enfalu sur tiu ĉi loko, kaj glutu ilin fajra geheno...

— Nur du vojevodoj ekzistas nun el niaj fratoj, ludsoldatoj, — kun malgajo diris Lukov: — Teodoro Matejeviĉ — laboranto, kaj Bazilo Andrejeviĉ — denuncanto kaj spiono...

— Nu, kaj ne indas pri tio paroli! — konkludis Voronin. — Tio estas lia cara volo...

La konversacio per tio finiĝis, komenciĝis gajo. La tataro, montrante la dentojn, dancis sur Voronin, Lukov levadis vaporon — en sia maniero, por ke la okuloj elorbitiĝu, vipadis sin, kriadis per antaŭmorta voĉo:

— Patroj, ve al mi, la morto venis! Fraĉjoj, verŝu malvarman! Ne memoru malbonon, infanoj...

Lukov, tuta en sapa ŝaŭmo, dancis, kantante:

Oj, bruligu, hej, bruligu,
Ĵetu fajron!

Ievlev kviete kuŝis sur la kuŝbreto, enviis al tiuj, kiuj vidis la Blankan maron nun, kiuj navigis sur ĝi, spiris bonan, fortan, salan venton...

Post la bano ili malstreĉiĝis. Voronin penis persvadi la tataron kristaniĝi, promesadis pro tio donaci al tiu arĝentajn talerojn, kiom tiu povos porti. La tataro subridadis, turnadis la kapon. En la domo de Rodiono Kirilovi̇ĉ ili eksidis trinki medon. Lukov kaj Voronin interŝanĝis rigardojn, Voronin diris kun suspiro:

— La granda ŝipestro ordonis ekscii — ĉu ne venis tempo sendi svatantojn? Kion vi diros, sinjoro Ievlev?

Ievlev levis la kapon, ekrigardis en la okulojn de Rodiono Kirilovi̇ĉ, paŭzis kaj diris sen hasto, por ke ĉiuj komprenu — tio ne estas ŝerco:

— Mi riverencas al vi, Rodiono Kirilovi̇ĉ. Via volo por mi estas leĝo.

La manoj de la maljunulo ektremis. Li reĝustigis la okulvitrojn, ĉirkaŭrigardis la gajajn ruĝajn vizaĝojn de Voronin kaj Lukov, mallaŭte diris:

— Kiom ajn plektu harligon, iam necesos malplekti[43]. Sendu!

Supre io falis, ekruliĝis, la onklo, glatumante la barbon, leviĝis:

— Mi iros forpeli la katinon, por ke ĝi kruĉojn ne frakasu...

Lukov kaj Voronin same leviĝis.

— Nu, Silvestro, — diris Voronin, — pereis via kapo: oni edziĝas por supo, kaj pro bonaj virinoj monaĥiĝas. Mi vin kompatas...

---

43 Laŭ la rusa moro, fraŭlinoj havis harligojn, kaj edzinoj ne, tial malplekto de la harligo signifis edziniĝon. *(trad.)*

Lukov trinkis ankoraŭ medon, viŝis la lipharojn, suspiris:

— Se preni pigon — hastema, se preni kornikon — kartava; edziĝos vi kaj mi, Jakimo, ne alie, al strigo. Jen kiam ni lin envios. Adiaŭ, Silvestro. Atendu svatantojn...

9. Kolombino kaj falko

En malvarma vespero de la tago de Sankta Paraskeva[44] en la domo de Rodiono Kirilovi̇ĉ kun bruo malfermiĝis la pordo, eniris Menŝikov, tuta kovrita per prujno, diris de sur la sojlo:

— Prepariĝu, li veturas. Kaj ne timu, ĉio okazos bone...

Ili ne sukcesis eksidi — la pordisto komencis malfermi la knarantan pordegon, ĉe la perono henis, interbatinte, ĉevaloj, en la vestiblo oni jam estis deŝutantaj neĝon de la botoj kaj ridegantaj per raŭkaj voĉoj. Rodiono Kirilovi̇ĉ, apogante sin sur lambastono, malalte riverencis al la gastoj.

— Al la fraŭlino svatiĝis tridek kaj tri, sed ŝi edziniĝos al unu — al li! — rapide parolis Petro, mallarĝigante la okulojn al hela flamo de kandeloj. — Ĉu vi bone fartas, Rodiono Kirilovi̇ĉ?

Kaj, ne aŭskultante respondon, ne eksidante, diris:

— Vi havas varon bonan, ni — aĉetanton brilan, kie, Rodiono Kirilovi̇ĉ, estas via hejtilo?

— Laŭ la rito, Siro, laŭ la rito! — kriis Menŝikov. — Nenio estis rompita, ĉio estas ĝusta!

La kancelariestro, hele ridetante, prenis la manon de Petro

44 En Rusio — la 28-a de oktobro laŭ la Julia kalendaro. *(trad.)*

— kondukis al la forno. La caro metis la polmon sur la fornan foston, kiel devas fari svatanto, staris ĉe la forno — grandega, la okuloj arde brilis, li parolis senhalte, tirante la kapon:

— Neniu kontraŭ svatanto fanfaronos: nia aĉetanto havas animon bonan, forton grandan, trezorojn havas senkalkule, zibelojn ne transporteble, lian bienon per okulo ne eblas ĉirkaŭrigardi, havaĵon lian ne eblas sur ĉevalo ĉirkaŭveturi...

La ludsoldatoj, Lefort, Gordon, Golicin, Nariŝkin — ridegis, eksidante sur benkojn, en la ĉambro odoris je neĝo, biero, tabako, longaj ombroj ĵetiĝadis sur la muroj, de tempo al tempo frapadis la pordo — eniradis ĉiam novaj kaj novaj homoj.

— Vian varon ni ŝatas, — firme kaj serioze diris Petro. — Ĉu vi ŝatas la nian?

Rodiono Kirilovič ekrigardis en la malfermitan honestan vizaĝon de Ievlev, silentis iom, respondis per malforta, sed klara voĉo:

— Ne al la patro mi donas, sed al la bravulo donas. Mia knabino estas saĝega, ŝia ŝpinaĵo estas maldikega, teksaĵo estas blankega, kaj el nia obeo ŝi neniam eliradis...

Petro kapjesis. Poste, turniĝinte al ĉiuj, demandis:

— Ĉu la falkon vi vidis, fraĉjoj?

— Vidis, vidis! — ekzumis oni en la ĉambro.

— Do, ni rigardu al la kolombino.

Kaj, larĝe paŝante post krablanta kaj lamanta Rodiono Kirilovič, li mem ekiris serĉi Maria-n Nikitiĉna-n en la domo. Ekkriante, ŝi foriradis de ili, ŝia voĉo iĝadis ĉiam pli malforta. Poste ĉio eksilentis. Finfine aŭdiĝis pezaj paŝoj de Petro.

Rodiono Kirilovi̯ malfermis antaŭ la fianĉino pordon, kaj la caro laŭte diris:

— Jen ŝi — la kolombino! La gefianĉoj junaj estu cent jarojn kunaj!

Kun forto li deŝiris la manojn de Manjo de ŝia vizaĝo, kunpremis per ambaŭ polmoj ŝiajn ruĝiĝintajn vangojn kaj firme kisis en la duonmalfermitajn lipojn. Poste li laŭte kriis:

— Estu vina pokalo ĉe la unua vizito. Verŝu, Rodiono Kirilovi̯, por ĉiuj ronde...

La maljunulo, levinte botelon, verŝis kalikon. Liaj manoj tremis, la botelon prenis de li Lukov, komencis plenigi pokalon post pokalo.

Manjo ekiris kun pleto inter la gastoj, riverencante al ĉiu malalte kaj al neniu kuraĝante rigardi en la okulojn.

Ĉe la tablo Petro sidigis ŝin laŭ nova, neaŭdita moro apud Ievlev kaj tuj forgesis pri la svatado. Retrokliniĝinte al la muro, metinte la grandajn pugnojn sur la tabloplaton, li estis rakontanta, ke en la angla reĝlando estas establita nova moro: rangoj en armeo estas ne donataj pro meritoj, sed aĉetataj kontraŭ granda mono. Kiu ne avaros — tiu estos eĉ generalo, kaj kiu estas malriĉa — tiu eĉ kapitanon ĝis maljuneco ne atingos.

— Lerte! — diris Ievlev.

— Brave! — subridis Gordon. — Ne estas pli bone, ol ili elpensis. Vundoj nenion kostas, mono ĉion kostas...

Kaj li kraĉis en kolero.

— Vidu, — diris Petro, — ne sen utilo tio estas ankaŭ por

ni... Nun, eble, tiuj, kiuj estas pli malriĉaj, ankaŭ al nia servo volonte venos...

Ĉiuj silentis. Petro ĵetis atentan rigardon al Ievlev, al Lukov, al Menŝikov, tiris la kapon kaj ordonis doni al si paperon kaj plumon. Snufante per la pipo, li rapide skribis liston — kiu printempe veturu al la urbo Arĥangelsko. Li koleris pri Menŝikov, ke tiu kontraŭas, forstrekis, ree skribis. Poste skribis Ievlev — kiajn necesas preni kun si ŝipajn provizojn, kaj Petro, paŝante en la ĉambro, diktis. Adiaŭante, li diris al la fianĉino:

— Nu, blondulino, kara belulino, kial vi ne ploras?

Li metis la manon sur ŝian ŝultron, ordonis severe:

— Sen mi la nupton ne festu!

Kaj turniĝis al la maljuna kancelariestro:

— Dum estas vintro, kolektu, Rodiono Kirilovič, ĉiujn foliojn, kiuj la maran metion koncernas, kaj ĉiujn kronikajn kopiojn. Silvestro legu. Li ne stulta naskiĝis.

Kaj, malalte kliniĝinte, por ne batiĝi al la lintelo, eliris el la ĉambro. Post li kun bruo kaj ŝercoj impetis ĉiuj ceteraj. Estis jam multe pli malfrue ol noktomezo. Per grandaj flokoj estis falanta neĝo, sur mallarĝaj stratetoj muĝis komenciĝanta blizardo. Kovritaj per neĝo, senmove dormetis gardistoj kun halebardoj, piediraj patrolantoj iradis kun muskedoj de angulo ĝis angulo, demandadis rajdantojn:

— Kiuj vi estas? Por kia neceso?

Lukov respondadis al ĉiu:

— Militaj homoj por cara afero, malfermu la barieron, alie vi ricevos skurĝon...

La barieroj knaradis, la patrolantoj timeme entiradis siajn kapojn en la ŝultrojn: kiu pasas, tiu batas, tiel eblas ne ĝisvivi maljunecon...

Petro veturis kun Menŝikov, diris pensante:

— Maro, maro... eĉ ĝojo ne estas ĝojo sen ĝi, Danilovič. Mi vidis ĝin somere, sed nun ĝi plu al mi viziiĝas. Pro kio tiel? — Kaj, ne atendante respondon, daŭrigis: — Ni ĝisatendos printempon — kaj reen al Arĥangelsko. Ŝipojn konstrui, maristojn serĉi. Malfacile... Kiel tie Teodoro Matejevič sukcesas, ĉu?

Ĉapitro dua

Ne tio estas malfeliĉo, kiam ĝi en la korton eniras, sed tio estas malfeliĉo, kiam ĝi el la korto ne eliras.

Proverbo

La vero laciĝis, al mensogo obeiĝis.

Proverbo

1. Monaĥejaj servantoj

En la preĝejo de la Prezento de la Nikola-Korela monaĥejo finiĝis tutnokta diservo. La monaĥoj, en malalte surmetitaj ĉapoj, kruddrapaj sensubŝtofaj sutanoj kaj treniĝantaj sur la templaj ŝtupoj talaroj, frapante per apogbastonoj kaj farante etajn krucosignojn, nehaste iris en la provizejon por vespermanĝo. Prioron Ambrozion estis subtenantaj ĉe la kubutoj la patro ekonomo kaj la patro armilisto: la prioro estis malsana, apenaŭ paŝadis per la nefleksiĝantaj kruroj. La vizaĝo de Ambrozio estis kolera, sub la tufaj, ankoraŭ nigraj brovetoj briletis malgrandaj malbonkoraj okuletoj.

La fiŝistoj, servantoj de la monaĥejo, ekvidinte la prioron, ekstaris. Sed tiu forturniĝis, neniun benis: ili dronigis barkojn, perdis multekostajn provizojn, sed ankoraŭ petas benon...

Rudristo Semisadov, akompaninte la frataron per rigardo, kraĉis flanken, trans pinan tombokrucon, balancis la kapon.

— Malbone, amikoj. Estos malfeliĉo.

Avo Teodoro — maljuna, maldika, malpeza, trairinta la

maron ĝis la Karaa markolo, dufoje vintruminta sur Grumanto, sentima kaj bonkora fiŝista avĉjo, — suspiradis, palpebrumadis, flustris kvietan preĝon, ke la monaĥoj ne sidigu lin ĝisvivi la maljunecon en prizonan kelon, en obskuron, kun solaj pano kaj akvo ĝis la vivofino.

— Ili nin povus almenaŭ manĝigi, damnitaj preĝuloj, antaŭ la komenco! — kolere eldiris rudristo Rjabov. — Tiel ni, Diaj sklavoj, ekstaros malsataj antaŭ ilia rapida juĝo...

En la provizejo la monaĥoj kantis preĝon.

— Malbone preĝas la preĝuloj! — diris Semisadov. — Nek harmonio, nek akordo...

Dum la monaĥoj vespermanĝis, lardofandisto Ĉernicin alportis rondon da pano, fiŝon-hipogloson kaj du rafanojn. La fiŝo estis forte salita, tia neniam putros. La fiŝistoj manĝis silente, altrinkadis fontan akvon el ĉerpilo. Poste ili kolektis panerojn, pankrustojn, envolvis en lapfoliojn, — estas nesciate, kion decidos la Dia juĝo.

— Antaŭ nelonge oni sen vi trajnon ien sendis, — rakontis Ĉernicin. — Mi kalkuladis, kalkuladis ĉaregojn, sed perdis kalkulon. Oni transŝarĝis sur barkojn — ne malpli ol kvindek. Kaj la tuta fiŝo estis bona, multekosta. Kiel la mono ne ŝtopas al ili la gorĝon, al la damnitaj monaĥoj...

Rudristo Ĥagajo subridis.

— En la pasinta jaro oni trezoraĵon alveturigis — du ĉaregojn da taleroj. Sur barko tiujn talerojn oni haŭlis laŭ Dvino. Faligis en ŝtonan kavon!

— Dia, Dia mono! — kriis la fiŝista avĉjo. — Vi ĝin ne kalkulu! Kien faligis, kien ne faligis, — ĉion ili bezonas scii...

— La mono ja ne Dia estas, avĉjo, sed nia, — severe rimarkis Rjabov. — Premas nian gorĝon la monaĥejo, ke ni eĉ spiri ne povas, sed vi plu — Dia kaj Dia. Nun jen ili nin juĝos pro tio, ke tempesto sur la maron falis. Sed ĉu ni kulpas? Ni kiom da niaj amikoj en la maro entombigis, por kio?

Avo Teodoro time silentis, palpebrumadis.

— Oni nin ŝovos en subterejon — tiam ni preĝos! — kolere promesis Semisadov.

Ili sidis longe, pensis — eble, fuĝi, ne atendante la Dian juĝon? Verŝajne, nun el la monaĥejo ne eblas foriri: gardisto kun halebardo staras ĉe la pordego, kaj fortika, frakasos la kapojn — kaj finita la afero.

Ĥagajo malgaje diris:

— Kien fuĝi? Saĝuloj al ni fuĝas — ĉe ni estas libero, kaj ni kien iros? Ĉu al bojaro kiel servutuloj? Aŭskultu, kion fuĝuloj rakontas — kielas ilia vivo...

La juĝo okazis en la provizejo tuj post la vespermanĝo. Monaĥoj, interflustrante, sidis ĉe la muroj, rigardis al rudristo Rjabov kaj lamulo Demĉjo Goroĵanin per malplenaj senkompataj okuloj. Ĉe la pordo gardis dikventra monaĥo Barnabo, — rudriston Rjabov-on oni timetis. En la provizejo estis silento, nur kraketadis torditaj kandeloj antaŭ la juĝantoj — la prioro, Agafoniko kaj ĉiam pi-aspekta, odoranta per storako, de longe mense senila monaĥo Afromeo.

— Parolu! — ordonis Agafoniko per voĉo, mallaŭta pro furiozo.

Rjabov suspiris, komencis rakonti ĉion laŭorde: kiel falis en la maro neĝa tempesto, kiel rompiĝis la masto, kiel granda

ondo disĵetis la fiŝistajn boatojn, kiel pro bato al la Hundaj ŝtonoj disfalis la ŝalupo de avo Teodoro.

— Ne pri avo Teodoro estas parolo! — kriis la prioro. — Pri vi, sentaŭgulo, estas parolo...

— Sed ĉu vi en la maro estis, ke vi bruas kontraŭ mi? — mallaŭte demandis Rjabov. — En la maron iri estas ne per jufto komerci...

La prioro oĥis, la monaĥoj ekflustris, ekbalancis la kapojn al la terura arogantaĵo de la rudristo: kion diris la malĝentilulo! Kion rememoris la fiulo! La prioron riproĉis per tio, ke tiu en pasintaj jaroj komercis per jufto...

Superante la bruon, per laŭta voĉo Rjabov diris:

— Monaĥoj! Anstataŭ preĝi pri la ĵus forpasintaj Diaj sklavoj, kion vi faras? Aranĝas juĝon? Kontraŭ kiuj? Kontraŭ tiuj, kiuj ĵus el la maro revenis, ne trinkigitaj, ne manĝigitaj, ne varmigitaj? Per kio vi penas timigi? Ĉu per subteraĵo? Per tio vi nin ne timigos! Kiom da tagoj la homoj turmentiĝis, kiom da teruro eltenis por la monaĥeja trezorejo, sed kiel vi ilin hodiaŭ renkontis? Ĉu malmulte vi de ni profitas? Al la Nova Tero ni iris — kiom da fiŝdento alportis. Kaj eĉ plurfoje ni iradis.

Demĉjo tiris la ankoraŭ ne sekiĝintan kaftanon de Rjabov, tiu forpuŝis lin de si, paŝis pli proksime al la juĝantoj, ekparolis pli laŭte, pli malmilde:

— Ĉu ni malbone penadis? Kiu barkojn da salita fiŝo al Moskvo kaj aliaj urboj pelas? Ĉu monaĥoj? Ĉu patro ekonomo? Ĉu patro armilisto? Ĉu beata Afromeo? Kaj ke mi dronigis la barkon — ni kvitiĝos! Kiam iros fiŝo — ĉu grandas kosto de tiu barko? Kaj pro la ilaro prenu, tiel ni interkonsentis,

tiel ni dungiĝis...

Ambrozio kun forto batis per la polmo la tablon — silentu!

Rjabov eksilentis.

— Tro aroganta vi estas, infano! — eldiris la prioro.

Rjabov ne respondis.

— Lango via estas tro akra, ne havas vi timon!

— La maro timemulon ne kompatos! — nelaŭte respondis Rjabov.

Ambrozio ŝirmis la okulojn per la mano, kvazaŭ pro laco, poste demetis la manon kaj ekparolis severe, nehaste:

— Pro la barko kaj la ilaro vi redonos en la monaĥejan trezorejon ĉion plene, kaj ne en la sekva jaro, sed tuj. Tio estas Dia mono, kaj kiam Dia mono promenas — tio estas ĝojo al Satano...

La monaĥoj krucosignis sin ĉe la nomo de la diablo, la debilmensa Afromeo malgajiĝis:

— Aj-aj-aj...

— Por tio, — daŭrigis la prioro, — iros vi jam hodiaŭ, infano, kiel piloto sur fremdlandajn ŝipojn, kaj Metrio Goroĵanin kun vi kiel interpretisto. La kondukan monon, kiun pagas ŝipistoj al piloto, kun tuta honesto kaj sen ŝtelo vi fordonados al patro Agafoniko por nova barko kaj ilaro. Kaj nutraĵon, kiu kune kun la konduka mono iras al piloto, vi povas sentime manĝi kaj per tio vivi. Kiam ne estos bezono pri pilotoj, iros al vi nutraĵo de la monaĥeja bieno, vi trancos fiŝon aŭ laboros kiel salistoj, aŭ, se okazos neceso, iros vi, infanoj, haŭli monaĥejan kargon laŭ Dvino...

Rjabov silentis: li atendis ion pli malbonan. Ne monaĥeja prizono — eĉ tio estas bona.

— Sed se vi ion faros malbone, — estis diranta la prioro, — fuŝe aŭ kontraŭ la dirita, tiam riproĉu vin mem, putros vi en la monaĥeja prizono, lavos vi vin per sangaj larmoj, faviĝos, ĝis la vivofino ne vidos Dian lumon...

— Aj-aj-aj! — ree malgajiĝis Afromeo.

La monaĥoj krucosignis sin, la prioro benis Rjabov-on kaj Demĉjon. Ili kankre eliris, kunpuŝiĝinte en la pordo kun Semisadov kaj avo Teodoro. Aliaj fiŝistoj estis atendantaj la Dian juĝon ĉe la perono...

— Nu, kio? — demandis Ĥagajo.

— Kiel piloto ili min sendis, — diris Rjabov, — vin ĉiujn ili same al laboro metos — kiel ŝarĝistoj aŭ al salfarejo. Ne timu, Ĥagajo!

Humida vento pelis tra la monaĥeja korto pezan odoron de fiŝo, salata en profundaj terkavoj, kovritaj per pinaj traboj, sunsekigata sur lignaj stangoj super la rivero, fumaĵata en malaltaj fumaĵejoj trans la monaĥeja tombejo. En la larĝan pordegon monaĥoj vice portadis korbojn kun ĵus kaptita fiŝo. Servistoj-tranĉistoj, tamburante per tranĉiloj, montradis aspekton, ke ili ne pro sia kulpo ne laboras. Super la ĉartrajno malalte flugis mevoj. Knabo-novico kuradis kun bastono-knarilo — lia laboro estis fortimigi mevojn, kiam oni tranĉas fiŝon.

Rjabov kaj Demĉjo eksidis en ĉareton, elveturis el la monaĥejo, preteris lardofandejon, en kiu estis fulganta la tubo, sur vojforko disveturis kun trajno, veturiganta en la monaĥejon

salon el malproksima salfarejo. La ĉareto ekruliĝis laŭlonge de Dvino, sur humida marĉa vojo.

Alte, longe zumadis kuloj.

Demĉjo ekdormis, elturmentita de timo, atendo, la tempesto en la maro, malsato.

Post noktomezo ili haltis ĉe la domo de Antipo Timotejev.

2. Vi ne edziniĝos al la leŭtenanto!

La rudristo silente rigardis al Taisja.

Ŝi kuris al li anhelante, nudpieda, nudkapa. Li iris al ŝi malrapide, peze metante la piedojn en sekiĝintaj vadbotoj. Nokta vento taŭzis lian mallongan molan barbon, la helajn krispajn harojn.

— Ĉu viva? — demandis Taisja, haltante kaj alpremante la manojn al la brusto. — La patro pro via morto dum dua tago drinkas, sed vi estas viva?

— Viva! — severe respondis li. — Kio al mi povas fariĝi...

— Ĉu estis terure, Ivaĉjo?

— Malmulte da gajo.

— Kaj ĉi tie, en la monaĥejo?

— Ili juĝis per juĝo pia...

Li subridis malmilde, eksidis sur la peronon, petis manĝi. Taisja elportis al li panon, sunsekigitan fiŝon kaj brandon en duonstofa botelo. La rudristo suspiris:

— Evidente, mi tiel bone aspektas, se vi per la propraj manoj vodkon al mi alportis...

Li renversis la kruĉeton en la buŝon, komencis avide maĉi la panon. Dormeme kriis virkokoj en la tenejo, la ĉaristo dufoje knaris per la barilpordeto — urĝis veturi. Taisja sidis apud Rjabov sur la perono, fingrumadis liajn harojn, ploris...

— Nun, mi pensas, ili entute min finos, — promesis li. — Ĝis morto kondukos, damnitaj. Vi, Tainjo, elpelu min prefere, ne taŭgas mi por vi. Ne edzinigos Antipo vin je mi, vi mem diras — dum dua tago pro mia morto li drinkas...

— Drinkas! — malgaje konsentis Taisja.

— Ĉu ĝojas?

— Li vin ne tre ŝatas.

— Mi scias...

Tenante lian manon, ŝi proksime ekrigardis en liajn okulojn kaj petis:

— Se vi, Ivaĉjo, vivus pli kviete!

— Malobeulo mi estas, knabino, ne povas vivi alie...

Li leviĝis sur la piedojn, brakumis ŝin per unu brako je la ŝultroj kaj, forte alpremante al si, ordonis:

— Pri la leŭtenanto eĉ pensi forgesu, ĉu vi aŭdas! Por ĉiam. Vi ne edziniĝos al li!

— Oĥ, Ivaĉjo! — elturnante de li sian fleksiĝeman trunkon, diris ŝi. — Oĥ, saĝas vi pli ol aliaj. Ne bezonas mi vian leŭtenanton...

Li forte kisis ŝin en la malfermitajn, malvarmetajn lipojn, liaj varmaj polmoj kunpremis ŝiajn ŝultrojn, ŝi longe, profunde suspiris:

— Vi, mia malfeliĉo!

— Ĉu malfeliĉo aŭ ĝojo, sed ne edziniĝos vi al la leŭtenanto. Aŭ al mi, aŭ restos fraŭlino...

— Jen kia vi estas!

— Jen tia, kia estas!

— Vere, elturmentiĝis mi kun vi...

— Tio, birdeto, ĝis la nupto estas nur malgajo, — ŝercis li. — Kaj kiam popo geedzigos, tiam vi malfeliĉon ekkonos...

— Ĉu vin min batados?

— Kiam vi ĝisvivos — vi ekscios...

Ŝi firme alpremiĝis al li kaj, tremerante pro mateniĝa freŝeco, ekiris akompani lin ĝis la ĉareto. Rjabov eksidis flanke, pendiginte la piedon trans la baran stangon, reĝustigis la kapon de Demĉjo, por ke tiu ne havu malbonan sonĝon, kaj ordonis al la ĉaristo ekveturi. La suno jam estis leviĝanta, nebuloj estis malrapide rampantaj super marĉoj, kaj Taisja plu staris, viŝante kurantajn larmojn, rigardis postsekve al sia rudristo...

3. Granda Ivano

Trimasta, peze ŝarĝita ŝipo «Ora nubo» estis atendanta piloton, starante ĉe la ankro en la Dvina buŝo apud la doganejo. Doganaj oficistoj kaj soldatoj kune kun maldika kancelariano interrompante unu la alian rakontis al Rjabov, kio estis ĉi tie hieraŭ: leŭtenanto Krikov trovis du barelojn da arĝento, tamen ne arĝenta, sed falsita. Tiuj bareloj estis destinitaj por pagi varon, kaj la brava leŭtenanto kaptis la ŝteliston preskaŭ ĉe freŝa faro. Jen ili staras — la bareloj, sub gardo, kovritaj per

bastomato, kaj soldato ĉe ili gardas konstante. Jen kia eltrovema ŝipestro, jen kia fisaĝulo! Li aĉetas varon en foiro ne alie ol pogrande, kun granda profito por homoj, sed pagas per nearĝenta arĝento. Kaptos oni poste la homon kun tia monero kaj trenos al enketo. La puno estas konata — la moneron oni fandos, kaj en la buŝon enverŝos...

Rjabov balancis la kapon — tio ja estas popolo komerca, kun ĝi necesas la orelojn teni streĉitaj...

Ŝipestro Urquhart ne perdis okazon plendi.

— Via leŭtenanto Krikov estas sama Dia plago, kiel la antaŭnelonga ŝtormo. Li alkroĉiĝis al la bareletoj, kiuj tute ne por Moskvio estis destinitaj, sed por komerco kun varmaj landoj. Nu bone, mi havos honoron plendi al sinjoro...

Demĉjo, lamante, iris malantaŭe, tradukante. Rjabov nehaste leviĝis sur la pobferdekon, ĉirkaŭrigardis la ŝipon — kia ĝi estas post la ŝtormo.

— Ho jes, jes, — diris Urquhart, — tio estis terura ŝtormo. Ni tre suferis, sed la Providenco en sia neeldirebla mizerikordo helpis nin.

Longkrura longnaza servisto de la ŝipestro, kromnomata Ardeo, kun tuta respekto jam staris apud la rudrorado, tenis pleton kun salviando, rumo, gdanska vodko en botelo: tiel deantikve oni devas renkonti piloton.

— Ĉu ni almanĝu? — demandis malcerte Demĉjo.

La rudristo riverencis per nura kapo, prenis de sur la pleto stanan ŝipan kruĉeton kun nigra rumo, Demĉjo, ĝeniĝante, elektis pli grandan pecon da bovaĵo. Jan Urquhart estis ridetanta, kavetoj tremis sur liaj dikaj fortikaj vangoj.

Du matrosoj nemalproksime estis plektantaj maton, kantantaj longan kanton en sia gepatra lingvo. Freŝa vento fajfetadis en la ŝnuraro, post la skulptita ŝipa pobo kun ŝprucoj, kun bruo estis ruliĝanta golfeta ondego, ĉio estis sala ĉirkaŭe, ĉio bruis, flugis nuboj sur la apenaŭ blua ĉielo, rapidege, kun akra krio faladis al la akvo mevoj.

Ŝipestro Urquhart plendis al Demĉjo:

— Pro laŭpezaj varoj ni po kvar groŝoj por rublo pagas doganon, pro ne laŭpezaj — po altino por rublo. Kaj pilotan monon, kaj ŝarĝistan, kaj staplan, kaj kiom ni ankoraŭ perdas pro laborhaltoj! Du tagojn ni ĉi tie ĉe la skansoj staras, dum oni pririgardas, kalkulas, pesas. Kaj poste oni nin ofendas. Se vi tiel malbone faros kun ni — al vi mem tio revenos malbone. Ni devigos vin komerci nur per bastoŝuoj, interkonsentos inter ni, ne irados al via Dvino — ni ne bezonas...

— Kion li kokerikas? — demandis Rjabov.

— Kokerikas, ke oni ofendas fremdlandanojn.

— Ili ofendeblas, atendu! — respondis Rjabov. — Maljunuloj rakontas: Antoĉjo Laptev, komercisto Jaroslavla, en malnovaj tempoj en Amsterdamon iris komerci per peltoj, eĉ unu pelton ne vendis, eĉ ne por unu rublo. Post multaj jaroj li revenis, tuta eltrivita, kaj mortis tuj. Ili inter si interkonsentis ne aĉeti — kaj ne aĉetis... Jen, kiaj ofenditaj!

Ekfajfis fajfilo, batis urĝa tamburo, la matrosoj ekkuris al siaj lokoj. Ilia estro, kun rompita nazo, kun forhakita orelo, kruce vipadis dorsojn per skurĝo, kriadis sakraĵojn en sia gepatra lingvo. La ŝipestro egalmezure pasumadis sur la pobferdeko, atendis. La tamburo batadis senĉese, la matrosoj

ekstaris sur siajn lokojn, la ankristoj ekpremis levstangegojn, la ankrovinĉo ekkrakis, ekknaris...

Urquhart en paroltubon el ledo kun pasamentoj elkriis komandajn vortojn, la tamburo ree ekĉirpis, mara vento ekflirtis en la veloj. Rjabov, metinte la manojn sur la rudroradon, jam estis enkondukanta «Oran nubon» en la buŝon de Dvino.

— Ĉu nun estas sana sinjoro vojevodo? — demandis Urquhart.

— Kion li demandas? — informiĝis Rjabov ĉe Demĉjo.

— Pri la vojevodo — ĉu li sanas?

— Kaj vi diru — ni kun Apraksin ne estas parencoj. Ni, diru, al generala kokino ne dungiĝas kiel nevoj. Nia afero estas kapti fiŝon, kaj ilia — manĝi fiŝsupon...

Plena vento fajfis en la veloj, la ŝipo iris, iomete kliniĝinte, ne per rivera, sed per mara iro, kvazaŭ ĉi tie ne estis malprofundaĵoj, kvazaŭ nenio minacis al la granda «Ora nubo» sur Dvino, kvazaŭ eĉ unu boato ne kuris sur la tuta rivero.

Matrosoj, demetante la ĉapojn unu post la alia, ĵetadis rigardojn al la ŝipestra ponto — rigardis, kia estas tiu rusa Granda Ivano, kiu kun tia lerteco kaj rapideco kondukas «Oran nubon», — jen kia piloto, tian piloton malfacilas trovi, kun tia piloto oni ne perdos tempon vane!

Iom poste, kiam la koro de la ŝipestro tute tremis — ne surgrundiĝu kun tia iro, — la Granda Ivano subite konsilis aldoni velojn, — tro, li diris, malrapide ni treniĝas, ne malfruu!

La koro de la ŝipestro frapis, ekbatis rapide, li mem eksentis

varmegon: «Ni trafaĉos kun tiaj ŝercoj, dronigos „Oran nubon“!» Sed hasti necesis, ju pli baldaŭ li ekvidos la vojevodon — des pli bone. Kaj ankaŭ negocistoj, verŝajne, atendas, se li malfruos — foriros varo al aliaj ŝipestroj.

Antaŭe — tuj kiam ili komencis eliri el rivera kubuto — kvazaŭ elkreskis karmine farbita alta, kruta pobo de «Sankta Aŭgusteno».

— Ĉu eblas supozi, ke ni venos la unuaj?

— Ordonu ankoraŭ aldoni velojn — ni ĉiujn devancos. Barko antaŭ la pruo! Aŭskultu, Metrio, ili per muskedo pafu, tie la fiŝisto laciĝis, ekdormis la akvoglutanto...

Matroso pafis per pistolo. La pomoro, en flirtanta sub vento longa kaftano, timigite ekstaris, tiris ŝnuron, premis la rudroremilon.

— De la Murmana bordo li iras, — diris Rjabov, — la vojo ne estas proksima. Rigardu, Metrio, kiel ili siajn barkojn konstruas, alie, ol ĉe ni. Rigardu, memorfiksu...

Urquhart, hastante, ordonis ree bati la urĝan tamburon, la homoj ekkuris hisi pliajn velojn. La ĉefa ferdekestro, nigra, longa, kurbe subridis, aprobe kapjesis. La Granda Ivano estis oscedetanta, kvazaŭ li vere enuis kun tia rapido. Malgrandaj figuretoj elkuris sur la karminan pobon de «Sankta Aŭgusteno», eksvingis la manojn, ekkriis. La rudristo ordonis demandi ŝipestron Urquhart-on:

— Eble, ni timigu ilin, se li deziros? Se li deziros — mi kondukos je arŝino for de la eskortŝipo, sed se li timas — ne necesas. Do, ni timigu la eskortulon, ĉu?

Ŝipestro per la okulo mezuris la distancon, subridis,

kapjesis. Kial ne timigi Garrit-on Koost-on? Ne ĉiam li, Urquhart, estis negocisto kaj ne por eterne li restos tia. Bona sturmo ekscitas, ankaŭ Koost ĝoju, rememoru, kiel puŝatakadis ŝipo ŝipon...

Rjabov per unu mano estis facile tenanta la ŝipon en obeo, rigardis antaŭen, mallarĝiginte la okulojn pro vento. Demĉjo brilis pro admiro.

La homoj sur «Sankta Aŭgusteno» ekkuris, ekkriis, levis flagan signalon, batis sonorilon. Estis videble, kiel ili malfermas la buŝojn, minacas per la pugnoj. «Ora nubo» estis iranta al ili, kvazaŭ intencante rostrobati, sed en la lasta momento Rjabov iomete ŝanĝis la kurson — «Ora nubo» trairis flanko ĉe flanko kun la eskortŝipo, nur brileris kanonoj en la malfermitaj embrazuroj de «Sankta Aŭgusteno». La eskortulo kun ofta sonorado, kun ŝrikantaj matrosoj, kun avertaj pistolaj pafoj restis malantaŭe.

La ŝipestro skuis la kapon, viŝis ŝviton de la vizaĝo, frapis Rjabov-on al la ŝultro. Maldekstre antaŭe malfermiĝis «Matura frukto». Poste ili devancis «Ĝojon de amo», poste «Oran muelilon». La ĉefa ferdekestro de «Ora nubo» Álvarez del Robles staris malantaŭe, konsiliĝante kun la ŝipestro. Rjabov indiferente retrorigardis al li, nelaŭte diris al Demĉjo:

— Unu tia en la pasinta foiro turniĝadis apude, kaj poste kvar altinoj malaperis. Lerta popolo.

La ĉefa ferdekestro, fleksiĝinte, riverencis al Rjabov, laŭdis lian pilotan arton.

Proksime de Arĥangelsko kun sonorado, signifanta: «atentu», «ne turniĝu», «mi iras tre rapide», kun flagaj

signaloj, lasante post si ŝaŭman surfon, arogante devancinte antaŭ la nazo «Blankan cignon», ili antaŭiĝis ankoraŭ al du negocaj ŝipoj kaj antaŭ la fremdlanda Komerca korto faligis ambaŭ ankrojn.

Rjabov, trankvile rigardante en la okulojn de la ŝipestro, elaŭskultis ĉiujn liajn flatajn kaj laŭdajn vortojn, rigardis, ĉu bone ili ankriĝis, laŭdis la ŝipon, ke tiu estas rapidira, bone obeas la rudron, laŭdis la matrosojn, ke tiuj estas rapidemaj kaj mallertulo estas nur unu, laŭdis la ĉefan ferdekestron, ke malgraŭ ke tiu estas hakvundita kaj kripligita febla maljunulaĉo, tamen havas fortegan voĉon — ĉe tia vento aŭdeblas por la tuta ŝipo, kaj batas li same taŭge — neniun lasis sen beno, ĉiujn krucosignis per skurĝo.

La ŝipestro ridetadis, alpremante la manon kun ringo pli al la ventro, ol al la koro. Elaŭskultinte ĉion, li petis la Grandan Ivanon pardoni lin kaj atendi malgrandan tempon, dum li veturos al la vojevodo, poste li tuj revenos, kaj tiam ili tagmanĝos ĉi tie, sur la ferdeko, sub tolmarkezo, kiun Ardeo jam estis instalanta super la tablo.

Matrosoj mallevis por la ŝipestro remboaton, oficisto tra Demĉjo diris al la ŝipestro, ke estas ordonite ne iri sur la bordon. Urquhart karesis la ŝultron de la oficisto, ŝovis al tiu monon. La oficisto suspiris kaj ordonis al soldatoj tralasi la ŝipestron.

— Kion do vi, oficisto, kokina barbo, faras? — demandis Rjabov. — La leŭtenanto starigas gardantaron, sed vi prenas monon? Ĉu tio estas bona?

— Ĉu tio estas via afero?

— Jen oni vin iam bastonbatos, ĝisatendos vi vian horon! — promesis Rjabov.

Li trairis la ŝipon, poste ekstaris ĉe la ŝtuparo, rigardis, kiel unu post la alia debordiĝas ŝipetoj — rusaj negocistoj estis irantaj komerci per vakso de Simbirsko kaj Vjatko, per jufto de Tvero, per fandita bovgraso de Arzamaso kaj Suzdalo, per ŝpinaĵo lina kaj kanaba, per ledoj de Dono, per kvadratitaj toloj hejmefaritaj, per densaj drapoj, per vivaj musteloj, guloj, lupoj, ursoj, alveturigitaj el malproksimaj lokoj, per vilo, kandeloj, fiŝgluo, gudro, salmo, kaviaro sturga de Astraĥano...

Sur la tuta Dvino ĉe albordiĝejoj kaj kajoj balanciĝadis Vologdaj kaj Ĥolmogoraj boatoj kaj barkoj. Ŝarĝistoj estis penportantaj sakojn, rulantaj barelojn, negocistoj iradis super siaj varoj, disputadis, kien meti. Jen tie, jen ĉi tie sur la kajo eksplodadis krioj — fremdlandanoj insultis, ke la rusoj tre multe ordonas; Jaroslavlaj, Vologdaj, Ustjugaj negocistoj sen ajna respekto same kriadis, ŝovadis pugnojn, ĵuradis per Dio...

Por juĝo venis rajdistoj, premis per la ĉevaloj al la jaroslavlanoj, vologdanoj, ustjuganoj. Por leciono fremdlanda oficiro en kaftaneto faligis en Dvinon sakon da tolo. La fremdlandanoj ekridegis, kondukis la oficiron drinki, la Jaroslavla negocisto rigidiĝis en mirego.

— Bone ni vivas! — diris Rjabov al Demĉjo. — Kiel bonege ni vivas. Antaŭnelonge sur Trabata strato Jakimĉjo Smit, fremdlandano, post la incendio konstruis domojn, ĉu vi vidis? Li baris per la konstruaĵoj la straton en la mezo — kaj fino. Eblas nek perpiede trairi, nek sur ĉevalo traveturi. Por li estas profito, kaj por niaj arĥangelskanoj — mizeriĝo, al la bazaro li ja vojon tute fermis...

— Kion do la niaj faras? — demandis Demĉjo.

— Skribas peticiojn, — malgaje subridinte, diris Rjabov, — ni, skribas, viaj orfoj, tute, skribas, mizeriĝis, niajn profitajn lokojn fremduloj akaparis, por nia brutaro ni ne havas paŝtejon...

Li kraĉis, skuis la kapon, suspiris.

Apude, ĉe la ŝtuparo, staris soldato, li turniĝis al la vortoj de la rudristo, rakontis, ke hodiaŭ estos grandega kverelo, ĉar fremdlandanoj memstare antaŭ la foiro ĉion ĉirkaŭveturis kaj aĉetis en vilaĝoj ĉion, kion ili bezonis. Moskvon mem ili atingis, kaj unu, la plej lerta, eĉ al Astraĥano iris por kaviaro. Niaj longbarbuloj pri tio ankoraŭ ne aŭdis, nur en Arĥangelsko-urbo oni eksciis. Prezoj estas tute faligitaj. Fremdlandanoj ne servas, ilia imposto estas alia, nun jam ne eblas juĝi.

— La negocistoj ja eltenos, — diris Rjabov, — sed tiuj ĉi kiel vivos, tiuj, kiuj platboatojn haŭlis, kiuj sur albordiĝejoj sen manĝo kaj trinko atendas? Nun, kiam la fremdulo alpremis, ĉu negocisto kun ili kvitiĝos? Iru, li diros, karulo, kun Dio! Kaj se tiu ne iros, estos batita al la kolo...

La soldato same skuis la kapon, suspiris.

4. Malfremdaj homoj

La vojevodon Urquhart ne trovis, sed neniom ĉagreniĝis pro tiu cirkonstanco, ĉar en la kancelario sidis kaj fumis argilan pipon bofilo de sinjoro Patriko Gordon kolonelo Snivin.

— Ho! — diris la kolonelo. — Ĉu ne sinjoron Urquhart-on mi havas honoron vidi mia gasto?

La ŝipestro kun brilanta rideto movis antaŭ la ventro la

ĉapelon, piedfrapis la plankon, ankoraŭ movis pli alte, ankoraŭ piedfrapis pli laŭte. Kolonelo Snivin faris saluton per la mano. La ŝipestro finis la ceremonion per abrupta turniĝo, ankoraŭ fleksiĝo, fina frapo de la kalkanumo al la kalkanumo. Kancelariano en timo kuris en la kelon por malvarma kvaso.

Kolonelo Snivin, ĝentile ridetante, rakontis al la gasto novaĵojn: baldaŭ devas veni Siro Petro Aleksejeviĉ. Estos, verŝajne, kaj Lefort, kaj sinjoro Gordon, kaj aliaj amikoj, kiujn la ŝipestro, eble, memoras. Ja li gastis en Kukujo ĉe Moskvo? Gastis ankaŭ ĉe la Perejaslavla lago?

La ŝipestro kapjesadis: certe, certe! Bonegaj, ĝentilaj, edukitaj sinjoroj, malsame de, ne riproĉu sinjoro kolonelo, tiuj moskvianoj. Li tiel ripozis tiam en Kukujo, tiel bonege pasigis tempon ĉe la lago.

— Kio pri la Siro? Ĉu li ankoraŭ ne forlasis siajn maraj amuzojn?

Snivin balancis la kapon:

— Ho ne! Juneco estas persista eĉ en siaj eraroj... Lia cara moŝto estas en ekstremeco kaj atentas nenies konsilojn...

— Sinjoro vojevodo? — singarde demandis la ŝipestro.

— Sinjoro Apraksin estas absorbita de la penso pri floto ne malpli, ol lia cara moŝto, — batpurigante la pipon, respondis Snivin. — Sinjoro vojevodo Apraksin ne multe pli aĝas, ol lia cara moŝto...

Nun ili ambaŭ — kaj la gasto kaj la kolonelo — estis balancantaj la kapojn. La kancelariano alportis kvason. Urquhart pro deco glutis, apenaŭ rimarkeble sulkiĝis, demandis kompate:

— Plej verŝajne, sinjoro kolonelo treege laciĝis pro la vivo inter moskvianoj kaj plurfoje revis pri reveno al siaj bonaj penatoj?

La kolonelo mallonge ekridis:

— Penatoj estas bonaj, kiam ekzistas taleroj aŭ aliaj oraj moneroj. Ĉe la moskvianoj mi estas kolonelo, sed kio mi estas tie? Ĉu mi jam faris kapitalon, sufiĉan por en mia patrujo aĉeti rangon almenaŭ de kapitano? Patento por rango kostas tre multe. Ĉe la moskvianoj ĉiuj devas obei min, oni pagas al mi duoble pli multe ol al rusa oficiro, ĉi tie al mi la oro fluas mem, sed tie mi forgesus, kiel ĝi aspektas, ne dirante eĉ pri tio, ke min komandus riĉa knabaĉo, aĉetinta al si patenton por generala rango...

Snivin koleris, liaj vangoj bruniĝis, la rememoroj pri la karaj penatoj ne kortuŝis la kolonelon, sed kolerigis...

La ŝipestro malagrafis sakon, pendintan sur lia femuro, elprenis el ĝi bele broditan monujon, metis sur la tablon:

— Tiuj ormoneroj, kolonelo, proksimigu la horon de via reveno al la patrujo. Mi esperas, ke en la angla reĝlando vi estos ne kolonelo, sed generalo. Kaj nun — pri la afero, kiu kondukis min al vi...

Kaj la ŝipestro rakontis pri la ofendo, kiun faris al li la knabaĉo, aroganta Krikov.

— Tiun arogantan knabaĉon estas ne tiel facile venki! — prononcis la kolonelo. — Ne de mi sola dependas plenumado de la leĝo en Moskvio...

La monujo kuŝis sur la tablo — tie, kien ĝin metis la ŝipestro.

— Tiu knabaĉo havas malfacilan karakteron, — diris Snivin. — Krikov estas obstina kaj insidema sinjoro. Mi timas, ke mi ne sukcesos helpi al vi, ĉar tiu monujo estas tiom maldika, ke el ĝi ne eblas manĝigi ĉiujn malsatantojn...

Urquhart tordis la vizaĝon: la kolonelo, vere, havas avidajn okulojn. Sen ajna afableco la ŝipestro metis sur la tablon ankoraŭ tri ormonerojn. La kolonelo alpremis la monerojn per la multhara mano kaj forrastis ilin kune kun la monujo. Sed lia vizaĝo plu restis morna.

— Nun, mi esperas, vi deklaros al Krikov mallaŭdon? — demandis Urquhart. — Ĉu vi timigos lin?

Snivin levis la dikan ŝultron.

— La gardistaron mi forigos, — finfine eldiris li. — Tio estas ĉio, kion mi povas. Cetero dependas de via inĝenieco kaj ruzeco...

«Vi bolu en infera peĉo! — pensis la ŝipestro. — Via animo ne iru al la ĉielo!»

Kaj li silente riverencis.

La kancelariano alportis inkon kaj pintigitajn plumojn. Snivin, snufante, ekskribis ordonon: la gardistoj iru for de la ŝipo, kiu venis sub komando de glorinda ŝipestro kaj negocisto sinjoro Jan Urquhart.

La ŝipestro tralegis la ordonon, suspiris, adiaŭis la kolonelon pli malvarme, ol salutis. Snivin proponis ankoraŭ kvason, Urquhart respondis:

— Dankon, sed tiu terura trinkaĵo ne konvenas al mi.

Kaj, ne invitinte Snivin-on sur la ŝipon, foriĝis.

5. Ni fuĝu, rudristo!

Urquhart revenis baldaŭ. Lia boato, ornamita per tapiŝo, alveturigis ankoraŭ unu fremdlandanon, lokan akapariston Chantré. Tiu estis ankoraŭ pli dika, ol la ŝipestro, iradis en kiraso sub la kaftano, ĉe li ĉie estadis servisto kun nomo Francisko — ulo kun klaftolarĝaj ŝultroj, aknohava, senbarba. Se io ne plaĉis al lia sinjoro, Francisko solvadis la disputon per triopa skurĝo. Li batadis kun tiro. Post tria bato ajna disputanto faladis sur la genuojn, petadis kompaton. Pri Chantré oni ankoraŭ diradis, ke unu lia okulo ne estas propra, kvazaŭ ĝi estas elprenata por nokto kaj, por refreŝigo kaj por ke ĝi vidu pli bone, metata en prisorĉitan akvon. La blinda okulo aspektis ne malpli bone, ol la vidanta, kaj sciantaj homoj certe asertadis, ke helpe de la malvera okulo la akaparisto ĉion vidas trae kaj ĉiujn trompas, kiel li deziras.

La ŝipestro nun estis gaja, al la soldatoj donacis po rublo, diris, ke li ne havas koleron al ili, kaj skuis la ordonilon: la gardon forigi kaj la sinjoron estimatan ŝipestron liberigi el la konfuzaĵo.

Tagmanĝa tablo estis primetita por kvar personoj, sed la tagmanĝo tamen ne iris bone. Unue la ŝipestro akompanis la forirantajn doganistojn, poste ion furioze diskutis kun la akaparisto Chantré. Poste unu post la alia venadis de la bordo boatoj: estis vizitantaj fremdlandaj gastoj-negocistoj — por difini prezojn por varo, por ekscii, kiom kostas nun rusa jufto, kiel vendiĝos gudro, kion oni diras pri birda plumo el Mezenjo, kiaj estas prezoj por potaso el Arzamaso, Alatiro, Kadomo...

Chantré eksidis apud la tablo, ne atendante inviton. Li trempadis malgrandan panpecon en saŭco, altrinkadis vinon.

Poste li ŝiris je pecoj tranĉaĵon da salviando, laŭte ekŝmacis. Li peladis la serviston jen por unu, jen por alia manĝaĵo...

Jan Urquhart, starante ĉe la ŝnureskalo, salutadis la gastojn, estante kvazaŭ en ioma distriteco, — ŝajne li estis tre laca, aŭ zorgigita de aferoj, aŭ meditema, aŭ eĉ ĉagrenita.

La negocistaro interŝanĝadis rigardojn, kelkaj krucosignadis sin. La malalta dikventra Urquhart estis timiganta senkompate: la varoj jam estis alveturigitaj, siajn ŝipojn, por iri en fremdajn landojn trans marojn, oni ankoraŭ ne konstruis eĉ unu, la somero estis varmega, kion fari kun kaviaro, kun facile salita salmo, kun bova lardo, kun ŝinko? Certe, Urquhart estas ankoraŭ ne ĉiuj ŝipestroj, sed ili havas reciprokan subtenon, kion donas unu, tion donas ankaŭ la ceteraj. Kaj nun li ankoraŭ havas ĉi tie propran multokulan drakon, jen li en fasta tago manĝaĉas salviandon, eĉ ne rigardas al kristanaj homoj.

Regalante la gastojn per vino el botelo, kun kiu iradis la servisto Ardeo, regalante per ĉipaj almanĝaĵoj, Urquhart subite diris, ke nun prezoj trans la maroj tre falis, tiel falis, ke eĉ ridindas diri, — duoble, trioble, kvaroble kompare kun la pasintjaraj.

La negocistaro ekzumis kaj eksilentis.

Unu negocisto el Jaroslavlo, tuta surkreskita de pikanta hararo, kvazaŭ erinaco, tiris Demĉjon je la basko de lia subsutano, plende petis:

— Vi, junulo, demandu lin, serpenton, iel ruze: ĉu li aĉetos aŭ ne, la hundo diru rekte; eble, li entute nenion bezonas, por kio ni niajn piedojn lacigas...

Rjabov sidis en brakseĝo kontraŭ la akaparisto, manĝis

nenion, trinketante malvazion, aŭskultadis. Severa maldika sulko kuŝiĝis inter liaj orkoloraj brovoj. Per la maldekstra mano li taŭzadis la barbon, ĵetante rigardojn al la ĉielo kaj al Dvino, al mevoj, malleviĝantaj — glate, flanke — ĝis la akvo mem.

— La prezoj tiom falis, — estis tradukanta Demĉjo, — ke la ŝipestro ne vidas sencon nomi al vi la nunajn, kiujn li povus difini. Kontraŭ mono la ŝipestro nenion povas aĉeti, sed povas nur kontraŭ varoj, kiujn li havas en sia ŝipo. Tio estas sekprunoj, ŝpinaĵo, damasko, olibano, perloj, vinoj — Rejnlanda, Kanaria, muskata, Kipra, Roma...

La negocistoj, puŝante unu la alian, ekbruis, eksvingis la manojn, — por kio ili bezonas vinon kaj olibanon. Tiam prefere donu li, kobolda filo, kudrilojn, aŭ kotonon, aŭ pulvon kaj fusilojn, kaj ferajn tranĉilojn. Nun por Kanaria kaj Roma vino tute ne estas postulo, nenien tiuj varoj vendeblas...

La ŝipestro, afable ridetante, respondis, ke tranĉilojn li ankaŭ krom Moskvio povas vendi, kontraŭ deca prezo. Sed ĉi tien la vojo estas malproksima kaj danĝera, ili prenu tion, kio estas, kaj se ne prenos — devos ili kargi reen siajn rem- kaj velboatojn. Tia estas la volo de Dio por la nuna foiro. Kaj li proponis eksidi al la tablo, gustumi, kiom bonegaj estas vinoj transmaraj kaj spicoj, kiuj ornamas ajnan, por homo decan nutraĵon.

— Ni en proksima tempo kunpremos viajn negocistojn jen tiele! — ruse diris la akaparisto Chantré al Rjabov kaj montris la pugnon, de kiu estis gutanta graso. — Ili agos laŭ niaj deziroj, sed ne laŭ la siaj. Kun ili ne necesas eĉ entute paroli. Kaj ilin ne endas enlasi sur la ŝipojn. Jen kio!

Lia viva okulo rigardis al Rjabov, kaj la malviva flanken — al la negocistoj.

Rjabov ne respondis, kolero al ĉiuj — kaj al la siaj, malhonorantaj sin antaŭ Urquhart, kaj al tiu ĉi lipharulo, makulita per lardo, — subite kaptis lian gorĝon. Chantré elpremis en sian vinon citronon, trinkis kelkajn grandajn glutojn, demandis:

— Mi en baldaŭa tempo havos propran ŝipon, ĉu vi ne deziros iĝi mia mara servisto?

— Ne deziros! — diris Rjabov.

— Pro kio tiel, homo?

— Pro tio, ke tiel estas.

— Sed kial do ĝuste tiel, sed ne alie?

— Mi estas libera homo, — morne diris Rjabov, — kaj kio ĝi estas — «mara servisto» — mi ne scias kaj scii ne deziras. Mi estas fiŝisto kaj rudristo, laborulo de mia maro, kial mi dungiĝu kiel servisto...

Kaj Demĉjo tiutempe estis tradukanta al la rusaj negocistoj:

— La ŝipestro diras ankoraŭ, ke por vi tio estas granda plezuro, ke li ĉi tien venis, kaj se ne venus — tiam entute por vi estus pereo, la afero estus finita. Ĉar li venis, tiam vi almenaŭ kontraŭ io povas vendi viajn varojn: rusa homo multon ne bezonas, tiel li diras, rusa homo povas modeste vivi kaj prosperi, li pli multe preĝu al sia rusa dio kaj obeu siajn estrojn, ĝuste en tio estas por li bono...

La negocistoj, malfacile spirante, timigitaj, flaviĝintaj, amase ekiris al la tablo, la longnaza Ardeo alportis ankoraŭ

seĝojn kaj benkon, sur la ferdeko malrapide trapaŝis la komandanto de la eskorto Garrit Koost — kun malhela, trahakita de la tempio ĝis la mentono vizaĝo, en leda maŝkiraso, en gantoj kun funeloj, kun pistolo sub la larĝa rimeno. Li eksidaĉis al la tablo, per la kapo almontris la negocistaron al la akaparisto, ekridis.

Apud «Ora nubo» estis ankriĝantaj aliaj ŝipoj de transmaraj negocistoj: ties ŝipestroj, afable ridetante, reciproke palpebrumadis kun Jan Urquhart. En mistera, nekomprenebla al Demĉjo lingvo li ion rapide rakontis al du ŝipestroj, ili ekflustris al aliaj — kaj Rjabov suspiris: malfacile estos dum la nuna foiro al la urbo Arĥanĝela, ne eblos vendi kontraŭ propra prezo eĉ je unu monero, interkonsentis la transmaraj ŝtelistoj, leviĝos nun ĝemo kaj ploro tie, sur la bordo.

— Sinjoro Garrit Koost — la eskortanto, — diris Demĉjo, — petas al vi transdoni, sinjoroj gastoj: nun en maroj pro maraj piratoj ne eblas libere trairi, kion deziras rabisto, tion li faras, eble, la lastan fojon ĉi tien ili el eksterlande venis, kaj ne plu venos. Sinjoro Garrit Koost diras, ke por unu negocista ŝipo necesas havi du eskortajn, sed tio kostas multan monon, vera ruinigo por negocistoj.

Garrit balancis la kapon, plenŝtopis la pipon per nigra tabako, ekfumis.

La negocistoj ekmoviĝis, komencis krucosigni sin pro la satana fumaĵo, Koost eligadis fumon en la barbajn vizaĝojn, alpremadis la tabakon per sia stumpa fingro, movadis la ebriajn okulojn. Li ne plu diris eĉ vorton. Aliaj fremdlandanoj same silentis, ridetante, drinketadis malvazion, glutadis rumon, fumadis sub Dvina venteto. Matrosoj sur la pobferdeko duvoĉe

ekkantis kanton, aliaj voĉoj subtenis. Rjabov aŭskultis kaj, forturniĝinte de la kompanio, rigardis al la proksima bordo, kie nigris amaso de simplaj homoj, — ili atendis, kion diros, reveninte, la negocistoj. La varoj estis transportataj el malproksime — ie sur akvo, ie trene, ie per remiloj, ie transŝarĝante sur ĉevalojn. Pro tiu vojo la homoj tute elturmentiĝis, iliaj vizaĝoj sekiĝis, la ostoj eliĝis eksteren, la haŭto forfrotiĝis sur la polmoj ĝis sango, ĉe ĉaristoj falis la ĉevaloj. Kiel nun vivi, kion diri al la edzinoj, per kio nutri etajn infanojn?

Kun agrabla rideto Jan Urquhart kriis al la ferdekestro, ke por ĝuo de la gastoj ludu muziko sur la pobferdeko, kaj la muziko tuj ekludis — malrapide kaj malgaje, kaj sub tiu muziko leviĝis sur «Oran nubon» la ekonomo patro Agafoniko en festa sutano, en monaĥa ĉapo, kun apogbastono. Novico, ŝvitegante, trenis post li bastan skatolon kun donacoj...

— Via piloto, — diris la ŝipestro al Agafoniko, — estas pura miraklo! Mi ne povas ne estimi veran lerton, sed eĉ pli profunde, mia patro, mi estimas talenton. En ĉia laboro oni povas esti lerta, kaj tio estas tre bona, sed de lerto ĝis talento distanco estas kiel de la tero ĝis la ĉiela lazuro. Via monaĥeja piloto posedas veran lerton. Kaj la ĉiopova Dio donacis al li ankaŭ talenton de maristo. La granda Ivano ne timas la akvan elementon. La venta elemento same ne estas timinda por li, kaj liaj iom krudaj manieroj ne malhavas siaspecan grandecon. En maro, dum ŝtormo, kontraŭ kio, certe, nin gardu Dio, tia helpanto estas perfekta trovaĵo...

Demĉjo estis tradukanta, feliĉe ridetante...

La ŝipestro elprenis el monujo, pendinta sur la zono,

ormoneron, metis ĝin sur la tablon antaŭ Rjabov, facile riverencis, petante akcepti.

— Tiu ĉi rudristo estas ankaŭ diotima, — prononcis la ekonomo, etendante la manon al la ormonero, — tial tutan sian akiritan monon li donas al la monaĥejo.

Kaj Agafoniko kaŝis la moneron en sian vastan, broditan, grasmakulitan monujon.

— Kaj vi, infanoj, iru! — diris li al Demĉjo kaj la rudristo. — Iru, kial sidi ĉi tie...

Malrapide ekiris Rjabov kaj Demĉjo sur la vaksita ferdeko al la ŝnureskalo kaj baldaŭ leviĝis sur la traban glitan kajon de Dvino, kie estis atendanta la negocistojn la plebo.

— Kio estas tie? — demandis unu, kun ruĝaj okuloj, kun seka, kvazaŭ pro febro, buŝo.

— Plej malbone! — eldiris Rjabov.

La popolo tuj amasiĝis ĉirkaŭ ili — premis tiel, ke Demĉjo grakis.

— Atentu, atentu — la infanon vi dispremos! — diris Rjabov.

— Ĉu ne prenas ili la varojn? — demandis alia viraĉo, en truita kaftano, forkonsumita, kun kaviĝintaj vangoj.

Duonnudaj Dvinaj ŝarĝistoj — fortikaj, barbaj, kun kroĉiloj — ekdemandis:

— Kaj ŝarĝistan monon kiam oni donos, rudristo, ĉu vi ne aŭdis?

— Tiom da pudoj ni transportis, kiel do nun?

— Onufrio ŝiris la ventron, jen li kuŝas, kion ni faru?

Tiu, kiun oni nomis Onufrio, kuŝante sur la bordo, sur bastomato, spiris malfacile, rigardis en la ĉielon per malplenaj, malklaraj okuloj.

— Kiel ni lin enterigos? — demandis iu el la homamaso.

Unu vologdano, alia ĥolmogorano — kriis ambaŭ kune:

— Falu ili, la negocistoj, en la inferon, kaj bakiĝu tie en fajro, sed ni ja nian perlaboritan ricevi bezonas...

— Ili luis boatojn, kaj nun kiel? Vi diru, rudristo, kion ni nun faru?

Ankoraŭ unu — malalta, nigra — puŝis Rĵabov-on en la bruston, kun angoro, kun plorĝemo en la voĉo eklamentis:

— Kiom da tagoj ni nenion manĝis, kiel ni vivu? La ĉevaloj ne estas nutritaj, ni mem per krusto kovriĝis, eĉ por banejo mankas groŝo, kion ni faru, instruu nin?

Mole paŝante per piedoj en bastoŝuoj, desupre laŭ tabuloj malleviĝis barba ŝarĝisto, eksidis kaŭre antaŭ Onufrio, enmetis en ties malvarmiĝantajn manojn vaksan kandelon.

Rjabov suspiris, komencis aŭskulti remiston. Tiu, malproksime de la mortanta Onufrio, estis parolanta per kruda, malespera voĉo:

— Ĉu akaparistoj estas sur la fremdaj ŝipoj? Ni konas ilin, malbenitajn ulojn, ilian nesatigeblan ventron. Ili mem nun aĉetas ĉion, ili mem ankaŭ vendos. Nun al ni, homoj, estas pereo. En arbarojn necesas iri, al pasataj vojoj, per rabo sian vivnutron akiri...

— Kaj ni iros! — diris tiu ŝarĝisto, kiu alportis al Onufrio la

mortan kandelon. — Ni iros kaj akiros...

Kancelariano-drinkulo, tuta disŝirita, estis klariganta al la popolo kapravoĉe:

— Vi, homo, juĝu mem: havas fremdulo cent dekduojn da kudriloj, ĉu? Do por kio li tiujn kudrilojn trairigu tra ies manoj, donu profiton al ankoraŭ unu homo, se li ilin mem povas vendi, kaj kun grandega profito, ne kontraŭ altino, sed kontraŭ kvin...

— Kiu aĉetos? — demandis la ŝarĝisto, traŝiriĝante al la kancelariano. — Se la prezo estas unu altino...

— Vi aĉetos. Ili havas interkonsenton! Fremduloj unu por la alia kiel muro staras, ĉe ili, malbenitaj tabakuloj, mano manon lavas...

De sur «Ora nubo» vento fojfoje alportadis sonojn de ĝuiga muziko, el tie kaj tien ofte navedis boatoj — transportadis negocistojn, doganajn tradukistojn, soldatojn, fremdlandajn ebriajn matrosojn, kvason en bareletoj, vodkon en boteletoj.

— Ĉu ili intertraktas? — oni demandadis de sur la bordo.

— Parolas! — oni respondadis de sur la boatoj.

— Ĉu ne interkonsentis?

— Tion ni ne scias!

La homoj trinkadis la Dvinan akvon, pinĉadis odoraĉan gadon sen pano, suspiradis, kvereletadis. Unu, malsekiginte panajn krustojn en ĉerpilo kun akvo, estis maĉanta la pankaĉon per la sendenta buŝo. Alia ĵetadis al li enviajn rigardojn. Ankoraŭ unu viro estis riparanta truiĝintan bastoŝuon, okulmezuranta, kiel fari pli bone. Ankoraŭ unu ĉiam demandadis, kie li povus vendi sian ĉapon.

— La ĉapo estas bona! — diradis li per mallaŭta voĉo. — Mi vendos la ĉapon, aĉetos panon...

Aliris vagabonda popeto, riverencis humile, demandis, ĉu havas la kristanoj ian bezonon de li.

— Bezonon ni havis, sed nun ĝi estas for, — diris maljuna ŝarĝisto. — Jen, vidu, finiĝis turmentoj de nia Onufrio. Forpasis li sen komunio...

La popeto riproĉe balancis la kapon.

— Eble, mi rakontu ion? — demandis li.

— Ja kion rakonti? Ni mem rakonti povas! — respondis la vologdano. — Eble nur jen: kiam la mondfino venos?

Pendiginte la mallongajn kruretojn super Dvino, la popeto eksidis, rakontis, ke nun restis turmentiĝi nemulte, antaŭe en la kalkulado de grandaj tempoj oni eraris, sed nun la lasta juĝo atendendas baldaŭ...

Rjabov silentis, aŭskultis kun subrido.

— He, rudristo! — oni kriis de sur boato.

Li retroturniĝis. Agafoniko kun la apogbastono, alpreninte severan aspekton, estis leviĝanta sur la bordon.

— Jen kiel estos, — diris la ekonomo al Rjabov kaj viŝis per la subsutana basko la vizaĝon. — Ni iru, fiŝisto, konversaciu...

Silente ili ĝisiris la monaĥejan ĉareton, jungitan per grasiĝinta ĉevaleto. Agafoniko ankoraŭfoje viŝis sin, plendis, ke estas varmege.

— Varme! — konsentis Rjabov.

La novico korektis tolon sur la fojno, streĉis jungorimenon,

demetis de la ĉevalo sakon kun aveno. La ekonomo plu silentis.

— Jene, infano, — diris li finfine kaj ekrigardis strabe al Rjabov. — Servos vi al la kreinto pro viaj pekoj.

— Pro kiaj tiaj pekoj? — antaŭsentante malbonon, demandis Rjabov.

— Kvazaŭ vi ne scias! — suspiris Agafoniko. — Kvazaŭ vi forgesis! La velboato ja, mi pensas, estis de la monaĥejo? Dronigita estas tiu velboato, prenis ĝin la maro. Kies peko? Ankoraŭ mi rememoris: en la pasinta jaro sekalan farunon de la monaĥejo vi transportis sur Dvino, du sakoj falis en akvon. Ĉu vi forgesis? Kies faruno estis? De la monaĥejo! Kaj nerespektema vi estas, Ivaĉjo, en la Dia preĝejo mi vin neniam vidas...

Li parolis longe, nomante ĉiujn pekojn de Rjabov. La rudristo staris morna, gratis ĉe la ĉevala orelo, la ĉevalo tiradis al li la molajn lipojn, serĉis donacon.

— Pro ĉio tio, — diris Agafoniko, — servos vi nun al la monaĥejo, iros sur «Ora nubo» kiel matroso, pri vi ŝipestro Urquhart estas tre kontenta. Tiel kontenta, ke pro vi antaŭ aliaj aĉetis la varojn de la monaĥejo...

Rjabov levis la kapon, liaj verdaj okuloj nekompreneble ekbrilis — ĉu li tuj ekridos, ĉu batos per la fera pugnego. Patro Agafoniko retroiris je paŝo kaj diris minace:

— He, ne aŭdacu tiel rigardi...

— Ne iros mi kiel matroso, — diris Rjabov neatendite kviete. — Kion mi tie ne vidis?

— Vi estas servanto monaĥeja, — vigligita per la kvieteco

de la rudristo, kriis Agafoniko. — Se estas dirite, do faru!

— Ne iros mi! — mallaŭte ripetis Rjabov.

— Iros! Se bonvole ne iros — ni vin ligos!

— Ba!

— Jes, ligos!

— Kaj la orfon mi ne forlasos!

— La orfo al Dio servas, sen vi ne pereos, ĉu komprenis vi?

Rjabov ekspiregis, liaj helaj okuloj ree ekbrilis.

— Mi estas homo kvieta, — diris li malrapide, — sed mian vorton mi neniam perfidas. Mi diris — mi ne iros, kaj mi ne iros! Kion ajn faru, mi ne iros.

— Oj, Ivaĉjo! — averte eldiris la ekonomo.

La rudristo silentis. Ree de Dvino aŭdiĝis muziko. En la preĝejo de Kristnasko oni eksonoris por vespro. Eksterlandaj matrosoj, jam sukcesintaj ebriiĝi en la drinkejo, brakumiĝinte estis irantaj al la albordiĝejo, dancetis, kantis, kriis per fiaj voĉoj.

— Kaj en la monaĥejon mi ne plu revenos! — diris Rjabov. — Mi servis sufiĉe!

— Ni kaptos! — minacis la ekonomo.

— Mi batalos! Viva mi al vi ne cedos!

— Ni al la kolonelo diros. Li ja kaptos. Rajdistoj vin ligos, kaj batos tiel, ke vi longe ne rekonsciiĝos.

Agafoniko ekfrapis per la apogbastono, lia vizaĝo kolere tordiĝis.

— Kontraŭ kiu vi ekiris, rudristo? Pensu per via kapo, havu racion!

Kaj per la bastono, per la tenilo, vipis tutforte la rudriston transverse de la vizaĝo tiel, ke Rjabov, ne vidante lumon, impetis antaŭen kaj kaptis la ekonomon ĉe la barbo. Agafoniko ekŝrikis, de la albordiĝejo ekkuris al la krio kaj batalo viroj, la novico kroĉiĝis al la rudristo per la grasaj manoj. Rjabov skuiĝis, la novico falis, ankoraŭ iu ruliĝis sub la piedojn de la rudristo, li transpaŝis ilin kaj alpremis la ekonomon al la rando de la ĉaro, tirante lian barbon ĉiam pli supren, kaj kun tia forto, ke ties okuloj montris la blankon kaj la spiro rompiĝis.

— Murdis! — kriis variolmarkita viro. — Finis la dikventrulon!

La vagabonda popeto estis alkuranta el malproksime al la batalo, krianta:

— Batu lin, batu, mi lin, malbenitan, konas, batu kontraŭ mia kapo, ŝiru la barbon...

— Ni fuĝu, rudristo! — per malespera voĉo kriis Demĉjo. — Fuĝu ni, oĉjo!

Nur pro tiu voĉo la rudristo rekonsciiĝis, pensis dum malgranda tempo, rigardis al la blua vizaĝo de la ekonomo kaj rapide, preskaŭ kure ekpaŝis al la Pafista kvartalo. Dum longa tempo li, zigzagante inter domoj, inter vendejoj de la Komerca korto, implikadis la spuron, laŭ kiu jam ekiris rajdistoj, serĉante la krimulon, farintan tage raban atakon, kaj al kiu? Al patro ekonomo mem de la Nikola-Korela monaĥejo!

Alpremiĝinte al forbrulinta konstruaĵo, Rjabov kaŝiĝis, tralasis la rajdistojn antaŭen. Insultante, ili ne rimarkis lin,

ekiris al Muskoj, — tien fuĝadis ĉiuj rabistoj, el tie oni trenadis ilin en malliberejon, en arestejon trans kradojn. Rjabov morne rigardis post ili. Ne, ili lin ne prenos, ne tiom stulta naskiĝis la rudristo Rjabov, por perei pro nenio, por mem lasi sin kapti...

Demĉjo, lamante je unu piedo, ĝiskuris al Rjabov, anhelante alpremiĝis al la karbiĝinta muro.

— Ho, kiel mi ekdrinkos hodiaŭ, Demetrio! — nelaŭte, mallarĝiginte la okulojn, plu malfacile spirante pro la kurado, diris Rjabov. — Pro ĉio mia amara, penega, malfacila. Ho, kiel mi ekdrinkos...

— Oĉjo...

— Kaj vi ne kontraŭu. Vi estos ĉe mi... Tagon mi drinkos, kaj ankoraŭ tagon, kaj ankoraŭ unu nokton pluan. Ĉu vi memorfiksis?

— Memorfiksis, oĉjo, — kun angoro kaj doloro flustris Demĉjo.

— Jene! Kaj per malgajaj okuloj al mi ne rigardu! Ne mortinto mi estas ja...

Ĉapitro tria

> Urson kiel amikon prenu, sed hakilon en la mano tenu.
>
> *Proverbo*

> Al amiko bonon, sed ankaŭ al si ne malbonon.
>
> *Proverbo*

1. En drinkejo

En drinkejo de Magrulo trinkadis vinon kaj fiŝistoj, kaj metiistoj, kaj malklaraj venintaj homoj, kaj negocistoj, kiuj estis komercantaj en la foiro ĝis la Simona tago mem, kaj fremdlandaj ŝipanoj, kaj diversaj ceteraj vagabondoj, riskemuloj, orfa semo. De mateno ĝis vespero, de vespero ĝis mateno, en bona kaj malbona vetero, en fasto kaj malfasto, en festoj kaj labortagoj, kaj vintre, kiam tago en la Arĥanĝela urbo estas mallonga kaj senluma, kaj somere, kiam la suno preskaŭ ne foriras de la ĉielo, — aŭdiĝadis el la etaj ŝtipaj malhelaj fenestroj de la Magrula drinkejo kantoj, malfacilaj krioj de homoj, ebriaj ĝis deliro, rido de malĉastulinoj, frapado de ĵetkuboj, kiujn ludadis fremdlandanoj, ebria bruo de interbatiĝo. Ebriuloj ofte kuŝaĉis apud la drinkejo, frostiĝadis dum ferocaj vintraj noktoj, malsekiĝadis sub aŭtunaj pluvoj, — ili neniun interesis. En malantaŭaĵoj de ligna antikva preĝejeto de la Naskiĝo de la Dipatrino, en la neuzata terpeco, kie vento fajfetadis en salikaro, plurfoje oni trovadis korpojn de tranĉmurditaj ebriuloj, trovadis homojn kun trabatitaj kranioj,

malvestitajn ĝisnude, sangstriitajn per tranĉiloj, — kiun ili interesis? Tiu, kiu trovis mortinton, venadis al Magrulo. Magrulo elportadis ĉerpilon da vino, bonan almanĝon — pro silento. La korpon oni kovradis per bastomato, trenadis en la vartenejeton. Tie ĝi kuŝadis ĝis okazo, ĝis pli malhela nokto. En malhela nokto oni veturigadis la korpon ĝis proksima larĝa Dvino. Ŝtonon al la piedoj — kaj faligadis ĝin malsupren; kun obtuza bruo ĝi faladis en la akvon, — serĉu la venton sur la kampo, ĝi ne baldaŭ elakviĝos, kaj se iam eĉ elakviĝos, tiam kiu rekonos — kiu estis tiu homo, kies nutranto, edzo, patro?

Oni diradis, ke Magrulo havas multan monon. Dufoje oni penis prirabi lin. Ambaŭfoje li rebatis, unu rabiston mortigis per hakilo, du aliajn batmortigis per fera fajrostango. Eble, ili estis veraj rabistoj, sed eble, neakurataj ŝuldantoj, kiu scias?

Ĝuste al tiu Magrulo iris Rjabov kun Demĉjo. Ĉi tie iam kun aliaj fiŝistoj, rudristoj, mastroj kaj dungitoj, kune kun ĉiuj laborantoj de la Blanka maro, fordrinkadis li ĉiujn siajn malsukcesojn kaj animsuferojn. Ĉi tie kun aliaj pomoroj — maraj kaj riveraj pilotoj, rudristoj kaj ŝarĝistoj, ŝipanoj kaj soldatoj — forgesadis li malfeliĉojn. Ĉi tie li fordrinkadis tutan sian monon, ĉi tie iam li drinkadis dum du tagnoktoj senĉese, ne elirante kaj ne sciante, kio nun estas — ĉu hela tago aŭ nigra nokto.

De tiaj, kiel Rjabov — kaj tiaj estis nemultaj, — Magrulo malofte postuladis monon, drinkigadis kaj manĝigadis kun granda respekto, abunde. Nek Rjabov, nek la similaj al li sciis, kial aperis tia kutimo, sciis nur sola Magrulo: maraj laborantoj lin ne senmonigos, eĉ se iun prenos la maro, sed profito estas granda. Tiuj homoj estas honestaj, dum ili estas vivaj, ili

redonos; ili scias: drinkeja ŝuldo estas la unua ŝuldo. Kio estas drinkita, tio estos kompensita, ĉu hodiaŭ, ĉu morgaŭ, ne gravas, sed kompensita estos pli ol sufiĉe, kun profito. Certe, okazadis, ke fiŝista boato dronis en la malvarma Blanka maro. Tiam Magrulo ŝmacadis per la lipoj, balancadis sian longan, similan al kukumo kapon, funebris, — kion fari.

Aliaj fiŝistoj ridadis, mokadis lin — embarasiĝis Magrulo, trompis la maro Magrulon, kiel grandas malprofito al Magrulo!

Magrulo silentis, snufadis, sed nenio ŝanĝiĝadis...

Nun Magrulo same ne demandis, per kio la rudristo intencas diboĉi, per kiaj enspezoj; li diris nenion, rigardante, kiel la rudristo eksidas al malpura tablo.

Diklipa ulo alportis pinĉitan gadon en salakvo, ĉerpilon da brando, bovlon da alka viando por Demĉjo.

Propre Arĥangelskaj homoj en tiu ĉi tago, malgraŭ la foiro, estis nemultaj — ne havis la popolo, per kio diboĉi, sed anstataŭe eksterlandaj ŝipanoj diboĉis plenforte — nemalgrandan profiton ili akiris. Ili drinkis rusan vinon, maljunan medon, bieron, almanĝadis rafanon en melaso, rapide ebriiĝadis pro nekutima forteco de rusaj drinkaĵoj, fanfaronadis unu antaŭ la alia; kelkaj tuj faladis sur la plankon, aliaj pene, raŭke kriadis siajn kantojn, triaj komencadis interbatiĝojn, konfuze svingadis spadojn, tuj paciĝadis kaj ree drinkadis, por post mallonga tempo komenci novan batiĝon.

— Pri kio do ili kverelas? — demandis Rjabov Demĉjon.

— Pro kio sian akapariston «Ora nubo» havis, sed «Matura frukto» ne havis! Nun kvazaŭ ĉiuj iliaj ŝipoj lasos akaparistojn en nia urbo.

Rjabov subridis, diris:

— Gaje ni vivas, bone! Tiom bone, ke eĉ ne scias, sub kiu ni vivas, antaŭ kiu ni la ĉapon demetu.

La fremdlandanoj denove komencis batiĝon, elfalis al la vento por interpikiĝi per spadoj. Unu, tuta en sango, falegis teren. Oni same forportis lin morti al la rivero — tie eblis pli trankvile priŝteli la mortinton.

— Eble, ni iros en malproksiman ĉambron? — demandis Demĉjo, ĝenata de la bruo kaj kun timo rigardanta al la senĉese frapanta pordo de la drinkejo.

— Ni ĉie sufiĉe sidos! — respondis Rjabov. — Mi ĉi tien, infano, ne pretere por malgranda tempo venis. Glore mi hodiaŭ diboĉos!

Liaj helaj okuloj ekbrilis per malbonaj lumoj, tuj estingiĝis, kaj la vizaĝo subite iĝis morna kaj nejuna.

— Ŝajne, suferis vi multe, oĉjo! — mallaŭte diris Demĉjo.

— Sed vi ja de kie scias?

— Rigardante al vi...

— Rigardante... jen vi rigardos, kia mi estos matene...

Ree frapis la pordo — eniris ŝipanoj de «Ora nubo»: la ferdekestro, kalva, nigra, maldika; kun li du matrosoj, unu sturma — por mara batalo — en kiraso kaj kun tranĉilo transverse de la ventro, alia — ferdeka — tuta trapeĉita, en virina kaptuko sur unu orelo, kun orelringo ĉe la vango. Demĉjo fiksigardis al ili, puŝis Rjabov-on, flustris:

— Oj, oĉjo, ne okazu malbono...

— Ĉu pro ili? — kun subrido demandis Rjabov. — Ni al ili tute ne necesas...

La ŝipanoj sidiĝis kaj postulis al si rusan vinon, kaj la ferdekestro, rimarkinte Rjabov-on, afable ridetis al tiu kaj svingis la manon. La rudristo respondis al li per deca kapklino. Ĉio estis en ordo: en drinkejo renkontiĝis maraj laborantoj, nun ili drinkos kaj, eble, drinkos je sia sano reciproke.

2. Bona komenco

Hispana supera ferdekestro Álvarez del Robles jam antaŭlonge iĝus ŝipestro kaj akirus propran ŝipon, se troviĝus tia negocisto, kiu konfidus parton de sia kapitalo al tiu ĉi miellanga, kruela nigrahara homo.

Tia negocisto ne troviĝis, kaj del Robles ŝipon ne ricevis. Pasis jaroj, la hispano kalviĝis, dufoje dungiĝis al svedoj sur militajn ŝipojn, denove foriris al negocistoj, nederlandaj, bremenaj, danaj. En unu navigado li estis navigisto, sed la ŝipo, ŝarĝita per valoraj varoj — kupro, klingoj kaj spicoj, estis atakita de piratoj, kiuj mortigis la ŝipanaron, kaj la hispanan navigiston savis la sorto, li revenis viva en Bremenon post du jaroj. En Bremeno la hispanon neniu prenis sur ŝipon. Tiam li iris al Stokholmo kaj ankoraŭ iom servis al svedoj. Sed el tie li denove estis forpelita kaj ree dum longa tempo navigadis kiel simpla matroso, ĝis revenis al posteno de supera ferdekestro.

Kun tempo ŝipestroj komencadis kvazaŭ timeti sian ferdekestron, kaĵoli lin, serĉi lian favoron. Pli observemaj homoj flustradis pri tio, ke la ŝipoj, sur kiuj servis del Robles, estis malpli atakataj de piratoj. Oni diris ankaŭ, ke iuj singardemaj negocistoj pere de la kalviĝinta hispano pagadis

ian tributon al iuj maristoj kaj eĉ ricevadis pri tio atestilon kun sigelo, sur kiu kvazaŭ estis desegnita striga kapo. Oni diris ankoraŭ, ke sufiĉis montri tiun atestilon al piratoj, prenintaj la ŝipon, kaj ili afable forlasadis la kaptitan akvoveturilon.

Certe, ĉio ĉi estis sensencaĵo, ne meritanta atenton, sed tamen la hispano sciis ne nur sian ferdekestran aferon. Li sciis multe pli ol tio, kion devis scii supera ferdekestro, kaj tial li servis ĉe ŝipestro Urquhart, pri kiu oni diradis, ke tiu estas ne nur ŝipestro kaj negocisto, sed ankaŭ militisto, kvankam eksa.

Del Robles kune kun sia ŝipestro plenumadis kelkajn komisiojn de iuj influhavaj kaj eĉ famaj personoj, kaj ĝuste tiuj komisioj precipe devigadis ilin ambaŭ — kaj la ŝipestron kaj ties ferdekestron — sulki marojn kaj oceanojn, endanĝerigi sin, suferi malfacilaĵojn kaj riski ne nur la sanon, sed eĉ la vivon mem, kiun ili treege domaĝis, konjektante, ke ĝi estas sola kaj post la tombo ilin tute nenio atendas.

La supera ferdekestro sciis, ke Rjabov estas vendita al ŝipestro Urquhart. Sciis li ankaŭ tion, ke la rusa rudristo foriris de la sankta patro. Sed nun lin estis okupanta alia afero, kaj pro tiu afero li ordonis al la diklipa ulo, servanta en la taverno, porti al la granda rusa rudristo kaj piloto plej bonan vodkon kaj almanĝaĵon de lia, ferdekestra, tablo.

La ulo portis. Rjabov mirigite movis la brovon. La ulo klarigis, de kiu estas la regalo.

— Jen kiel! — diris Rjabov kaj ordonis voki Magrulon.

La malklarokula mastro aliris flanke, kun timeto, ekrigardis al Rjabov singarde, — kion ankoraŭ bezonas tiu knabego?

— Prenu bastan korbeton, — ordonis Rjabov. — Puran,

glatan, pli bonan... El tiuj, kiujn majstrinoj en Vavĉugo faras... Tiun korbeton ĝis la rando mem plenigu per dolĉaĵoj — mielaj kaj papavaj, nuksaj kun melaso, kaj pli bizaraj: ekzistas ŝipetoj, birdoj, domoj, sledoj... Ĉu komprenis vi?

Magrulo rigardis kun suspekto: kie oni aŭdis tion, ke ebriulo al dolĉaĵoj emus?

— Por kio ĝi?

— Por neceso.

— Por kia neceso? Ĉu por svatado?

— Mi ne svatiĝos. Aŭskultu plu — ankoraŭ ne ĉio estas dirita. Tablon larĝan metu por granda sidado...

La mastro montris sur la vizaĝo stultecon.

— La tablon kovru ne per malpura ĉifono, sed per brodita tablotuko. Sur la tablon metu...

Rjabov ekpensis, pinĉante la barbon.

— Metu vinon distilitan kaj fiŝsupon — bonan, bojaran, kun safrano, ĝi estu grasa, ĉu vi aŭdas? Kokojn donu kun vinagro, kaj maljunan acidan brasikon, kaj pizon frotitan kun cepo kaj ajlo. Vinon donu en kruĉo, sed ne en stofa botelo kaj ne en ĉerpilo, drinkos grandaj homoj — ne ŝtelistoj, ne rabistoj, sed de la mara metio laboruloj...

Magrulo palpebrumis al la diklipa ulo. La ulo aliris, pendigis siajn pugnojn-martelegojn, suspiris: por venki tian rudriston, necesas multa tempo.

— Ĉu nun via moŝto pagos aŭ kiam? — demandis Magrulo. — Ordonoj multas — mono ne videblas...

Rjabov trankvile ekrigardis en la okulojn de la tavernisto, respondis, kvazaŭ pensante:

— Hodiaŭ al mi tiuj eksterlandaj matrosoj sendis la plej bonan vodkon kaj almanĝaĵon de sia tablo. Tio estis sendita pro tio, ke mi en niaj lokoj estas la unua piloto. Ĉu povas mi nian honoron rompi antaŭ fremdlandanoj? Kiel vi pensas?

La mastro denove palpebrumis al la ulo — foriru.

La ulo foriris, balanciĝante. La fremdlandanoj estis kantantaj ĉe sia tablo.

— Honoron ankaŭ ni gardas! — diris Magrulo post paŭzo. — Kaj kvankam ni scias, ke la maro rompis vian velboaton kaj vi mem apenaŭ sukcesis per preĝo vian animon savi, — vidu, kiel ni primetos la tablon...

La griza vizaĝo de la tavernisto ruĝiĝis. Dum estis sternata la tablotuko, Rjabov estis nehaste diranta:

— Al honoro mi per honoro respondas, kaj ne same, sed dekoble. Al ilia honoro — dekoble, kaj al la via — dekoble. Kalkulu dekoble la drinkitan kaj manĝitan...

Magrulo klinis sin, respondis dignoplene:

— Magrulo estas Kaina animo, tion ĉiuj scias, sed eĉ Magrulo havas propran fieron. Vi pagos tiom, kiom estos elspezita. La maldikkruruloj vidu, kiaj ni estas en gastamo...

De si li ordonis porti al la gastoj juniperbrandon, kaj fiŝan blinan pirogon kun butero, kaj eglefinon kun gadaj hepatoj. Li mem ĵetiĝis en la kuirejon, la filino ekportis botelojn, la diklipulo — porkan duonon. La fremdlandanoj rigardis mire — al kiu tian festenegon aranĝas la tavernestro, por kiu estas la

ornamita tablotuko, multekostaj glasetoj...

Rjabov klinsalutis la gastojn.

— Dankon pro la bona komenco, — diris li kun subrido. — Ni komencis festeni laŭ via maniero, kaj nun ni festenu laŭ la nia. Gustumu kaj drinku laŭ la rusa moro. Nia gastigado estas multmanĝa, malsame de la via — nura drinkado kun babil-kokerikado. Se tiel, ni do kune sidu, kaj komencu kun beno. Vintrinkado estas afero ne ŝerca, farendas ne haste, diligente...

La hispano en ruf-flava kaftano, en larĝa leda zono, kun spado kaj faldebla tranĉilo aliris al Rjabov ceremonie — kun riverenco, kun turnado per la ĉapelo, kun piedfrapado...

— Nu, bone, bone! — bonanime respondis Rjabov. — Ne necesas... mi eĉ ne scipovas tiel riverenci. Ni, knaboj, eksidu al la tablo...

Transsidiĝinte al la tablotuko kun manĝaĵoj kaj drinkaĵoj, la rudristo per la mano glatigis la orkoloran barbon, levis la kapon, movis la brovon, nehaste, per grandaj glutoj eltrinkis vinon...

La trinkokruĉo estis nemalgranda, la vino estis forta, la fremdlandanoj rigardis kun scivolemo — kiel la Granda Ivano tion eltrinkis tuj. Rjabov flaris pankruston, pinĉis brasikon. Lia ĉemizo estis disŝirita ĉe la ŝultro, la kolumo estis malbutonita malalte, tiel ke videblis la arĝenta baptokruco sur malheliĝinta laĉo... Li ne sukcesis, ne havis tempon transvestiĝi ekde tiu horo, kiam li eliris el la akvo, el la tempeste bolanta Blanka maro...

— Nu? Kial do vi ne drinkas? — demandis li, verŝante vinon. — Ĉu vi interkonsentis ofendi min?

Laŭ la komenco de la konversacio del Robles pensis, ke la piloto estas profunde ebria. Sed li tuj konvinkiĝis, ke la rudristo estas tute sobra. La okuloj de Rjabov nun rigardis milde, kun bonkoreco kaj kareso. Palpebruminte al la matroso kun orelringo, li ordonis al Demĉjo traduki, ke li regalas la gastojn ne laŭ la tradicio, ne hejme, ĉar en la domon voki ilin li ne povas — li estas senfamilia, kaj la domo estas tro malriĉa. Demĉjo timide tradukis ne ĉion, la malriĉecon prisilentis.

Per sia mano la piloto verŝis al ĉies trinkokruĉoj kuracan juniperbrandon, — Magrulo alŝutadis en ĝin pulvon kaj diradis, ke ĝi kuracas el ĉiuj malsanoj, kaj se iu homo estas tro malforta, tiu ne plu suferos: la kuraca juniperbrando tuj ŝiras la ĉefan vejnon, kaj la malsanulo per gajaj piedoj en ebrio foriras en la landon, kie estas nek malĝojoj, nek lamentoj...

La unua levis la trinkokruĉon del Robles kaj, kuraĝe retroklininte sian kapon en bukloj apud la oreloj, eltrinkis ĉion ĝis la fundo. Dum ioma tempo li silentis, poste liaj nigraj senbrilaj okuloj elmetiĝis, li leviĝis de sur la benko, ree eksidis kaj ree leviĝis. La rudristo por deco eĉ ne ridetis.

— Ne gravas, — superante per la potenca, kvankam milda voĉo ebrian bruon de la drinkejo, diris Rjabov, — komence ĝi forte efikas, se la homo estas sen kutimo. Unuvorte — kun pulvo macerita. Sed se iu kutimiĝis, tiam ĝi, patrino, bonas. Ĝin necesas almanĝi, sinjoroj maristoj, per la fiŝa pirogo, — ĝi en la pirogo tuj sufokiĝos.

Del Robles finfine rekonsciiĝis. En liaj okuloj aperis larmoj — la unuaj post la infana aĝo. La matroso en kiraso estis spireganta, la alia, ferdeka, estis movanta la lipojn, kvazaŭ preĝanta.

Rjabov vokis la tavernestron, neniu respondis: kaj Magrulo kaj lia diklipulo eliĝis kun granda interbatiĝo sur la peronon — ili estis elbatantaj ebriulojn. Tiam la rudristo mem leviĝis, iris por kvaso, por ke la gastoj altrinku per ĝi la juniperbrandon.

Tuj kiam Rjabov revenis kaj eksidis sur la benkon, Demĉjo, lispante pro emocio, diris al la orelo de la rudristo:

— Oĉjo, ne trinku tion, kio en la kruĉon estas verŝita. Ne rigardu al mi... Ne trinku. La nigrulo pulvoron alŝutis, mi mem vidis...

Rjabov subridis per solaj lipoj. Jen tiel vi vivas en la mondo — ĉiam pli malbone. Do, ni vidu, eĉ ne tiajn aferojn ni vidis. Dume ni ridas, eble, ni ploros, sed ne hodiaŭ!

La matroso en kiraso subite diris:

— Ho mia ĝardeno, ho mia Vilhelmino, mia kara edzino, ho mia ĝardeno, mia ĝardeno, mia domo...

Kaj ekploris. Dum del Robles estis konsolanta kaj riproĉanta lin: kial vi frenezumas, stulta kapo, Rjabov interŝanĝis la trinkokruĉojn: al la matroso kun orelringo — la sian, al si — la lian. Ili denove drinkis, kaj del Robles demandis: ĉu vere estas, ke en Vavĉugo per zorgo de komercistoj Baĵenin-oj, laŭ cara ukazo estas konstruataj ŝipoj por mara irado? Estas interese scii, ĉu baldaŭ Moskvio eliros sur marojn. Caro Petro, lia sanktoleita moŝto, daŭrigu la Disinjoro liajn tagojn, onidire intencas fari tion, kio antaŭe ne estis. Kaj kiaj ŝipoj estas konstruataj en la konstruejo de Baĵenin-oj? Kaj ĉu vere estas lertuloj, kiuj legas desegnaĵojn kaj laŭ la tuta scienco konstruas verajn ŝipojn.

Demĉjo tradukis, Rjabov pigre subridis. Vavĉugo ne estas

proksime, de kie li, sinjoro, sciu? Kvazaŭe oni ion konstruas, sed kion — kiu scias? Segejo tie estas — li aŭdis, tio estas vero, tiel multaj homoj diris. Kaj li ree subridis.

Del Robles kun entuziasmo denove ekdemandis, kiel povas okazi, ke tia fama piloto ne scias pri Vavĉugo? Kiu do tiam scias? Eble, la piloto ne scias ankaŭ tion, ke en Solombalo vojevodo Apraksin mem konstruas ŝipon?

— Mi aŭdis! — respondis Rjabov.

— Kaj kvazaŭ ĝi estas nomita omaĝe al sankta Paŭlo. Kaj ke el urbo Amsterdamo ankoraŭ unu ŝipo estas atendata, pli ol kvardekkanona? Kvazaŭ kvardek kvar feraj kanonoj estos sur tiu ŝipo, el kiuj ses estas haŭbizoj?

Rjabov elaŭskultis la tradukon de Demĉjo kaj nenion respondis. De kie li sciu?

Tiam del Robles ekridis.

— Aj-aj-aj! — diris li kun karesa riproĉo. — Eĉ trans la maroj oni scias, ke caro Petro intencas konstrui floton kaj por tio ĉi tien veturas duan fojon, sed la piloto ne scias, nenion scias. Sur la Mosea insulo oni la caran domon denove riparis, la alian kovris per tegmento, kaj kuiristojn pelis al la kuirejo, kaj brutaron por cara tablo, kaj bovinojn, por ne kirli kremon transportante trans Dvinon, kaj gardistaro tie staras kun halebardoj!

Demĉjo tradukis. Rjabov, paŭzinte, respondis:

— Al kiu porko malaperis, al tiu en la oreloj ŝriko staras. Kial lin interesas la ŝipoj! Diru, Demetrio, — la rudristo havas proprajn aferojn sate, li jen ĵus el la maro eliris, kiom da tagoj tempesto taŭzis, kiom da boatoj rompiĝis, paciĝis tiuj fiŝistoj

por eterne...

Dum ili tiel parolis, la matroso, kiu trinkis la vodkon kun alŝutita pulvoro, subite malkvietiĝis, komencis diri galimation; del Robes tiris lian manikon, li ĵetis al tiu sovaĝan rigardon kaj en eksciteco ree ekbabilis en sia lingvo. La rudristo interŝanĝis rigardojn kun Demĉjo, la hispana ferdekestro interkaptis ilian rigardon, komprenis, ridetis per ĉiuj faltoj:

— La gajiga drogo, kiun mi alŝutis, surprize trafis ne al tiu, al kiu estis destinita. Ĉi matroso nun kvazaŭ flugas en la aero, kiel dia anĝelo, kaj vidas ĉion en plej agrablaj koloroj.

— Kio do estas agrabla? — demandis severe la rudristo. — Li al si mem malsimilas. Vodko estas pli facila, kaj ne mortigas, kaj ĉi tie li jen, iĝis blua...

Ili eliris el la drinkejo proksime al mateno.

La matrosoj apenaŭ movis la piedojn. Tiu, kiu trinkis la drogon, tute malvigliĝis; la alia kantadis kantojn, kaptadis kokinojn, konfuzintaj pro blankaj noktoj, kiam tempas dormi, kaj kiam vagi sur stratoj, serĉi al si nutron...

— Nun sur la ŝipon, sur nian, — diris del Robles, — ĉu ne?

— Pro kia diablo? — respondis Rjabov.

— La piloto nun ne povas bonveni sur vian ŝipon, — tradukis Demĉjo, — la piloto havas ankoraŭ aferojn en la urbo Arĥangelsko, kiujn li nepre bezonas plenumi...

— La piloto iros kun mi sur la ŝipon, — firme diris del Robles kaj tuŝis sian kirason sub la kaftano. — La piloto devas esti sur nia ŝipo.

Tiutempe el trans angulo de la arsenalo elrajdis kolonelo

Snivin en akompano de dekduo da fremdlandaj rajdistoj. Li ŝatis faradi tiajn noktajn rajdpatroladojn en la urbo, des pli, ke noktoj somere estadis sunaj, kaj famo iris tia, kvazaŭ vere la kolonelo nokte kaptas rabistojn kaj ŝtelistojn.

Rimarkinte la kolonelon Snivin-on kaj rekoninte lin laŭ la korpulenta figuro, del Robes firme prenis la kubuton de la rudristo kaj mallaŭte diris al Demĉjo:

— Mi ne povas ne rekomendi al la piloto iri kun mi sur la ŝipon. La piloto estas aĉetita, kontraŭ li estis pagita mono. Ĉu vere necesas klarigi, ke pli bone estas fari la maran aferon, ol putri en la monaĥeja prizono, kie pli aŭ malpli frue la piloto ricevos laŭmerite...

Kolonelo Snivin veturis malrapide, kun grava aspekto. La suno estis prilumanta la krudajn vizaĝojn de la rajdistoj, briletadis en ŝildetoj sur la jungilaro, ludis sur facoj de ŝtalaj bajonetoj...

— Diru al la ferdekestro, Demetrio, — ordonis Rjabov, — diru: maltaŭge li faras.

Demĉjo ruĝiĝis, ekparolis rapide. En la juna, ankoraŭ rompiĝema voĉo aŭdiĝis larmoj.

— Ne petu! — abrupte diris Rjabov.

La rajdistoj haltis apude. La korpulenta kolonelo Snivin tuj komprenis, pri kio parolis la hispana ferdekestro, kaj, ne finaŭskultinte, batis Rjabov-on per sabringo al la kapo. Rjabov ŝanceliĝis, sed ne falis. Del Robles per unu movo eltiris faldeblan tranĉilon kaj levis ties klingon antaŭ la vizaĝo. Maljuna rajdisto puŝis la rudriston per ferumita ŝuo, alia vipis al la ŝultroj per skurĝo kun enkudrita ferajo. Snivin, eliginte la

sabron, per la malakra flanko ree batis la rudriston al la kapo. Rjabov falis, kaj tiam ĉiuj surfalis sur lin. Leviĝis polvo, la rajdistoj deĉevaliĝis, ekruliĝis en polvo tiel ke ne eblis kompreni, kiu estas kie. Del Robles kun sperto kaj lerto rapide surĵetis sur la kolon de la rudristo strangolan maŝon kaj ektiris. Rjabov ekstertoris. Demĉjo tion jam ne aŭdis — li perdis la konscion pro bato per ferumita boto al la kapo...

Sur la strato estiĝis silento.

La kolonelo diris, enigante la sabron en la ingon:

— Malfacile estas kun tiu popolo. Ili estas malobeemaj, kruelaj, kaj ni definitive ne povas kredi al ili.

Del Robles respondis:

— Se ne la plej inda kuraĝo de via kavalira moŝto, kiu scias, per kio finiĝus ĉi batalo!

Tiutempe el trans la arsenalo elkuris la diklipulo, sendita de Magrulo por fordoni la skatolon kun dolĉaĵoj, kiujn mendis Rjabov por la fremdlandanoj. Sed la rudristo mem estis kuŝanta senmova, ligita, en polvo, kun strangola maŝo sur la kolo. La tradukisto same kuŝaĉis apude. La ulo staris iom, pensis kaj retroiris.

Preterinte la arsenalon, li eniris en lapojn, malfermis la skatolon kaj ŝtopis sian buŝon per la frandaĵoj. La dolĉaĵoj estis mielaj, multekostaj, kuiritaj kun zingibro, kun papavo, kun kukurbaj semoj. Ĉi tie, en la lapoj, la ulo manĝis ĝissate, kaŝis la skatolon en malnova incendiejo, viŝis la manojn, miris pri sia neaŭdita kuraĝo kaj ekiris reen, elpensante, kion li mensogu al la tavernestro.

3. Snivin kaj James

Kolonelo Snivin veturis malrapide, retenante la ardan ĉevalon, malestime gapante al la flankoj per siaj kankraj okuloj de akva koloro: li malestimis ĉi tie ĉion kaj ne kaŝadis sian malestimon. Kaj pri nenio alia li parolis, ol nur pri tio, kiel li malestimas la moskvianojn. Por kaĵoli lin, okazadis, ke Arĥangelskaj negocistoj sin mem insultadis per plej malbonaj vortoj... Fierajn, fortajn, neobeemajn li fleksadis arke; se ili ne fleksiĝis — rompadis. Majoro James — anglo, lia asistanto, dek ses fojojn vendinta sian spadon al dukoj, markizoj, imperiestroj kaj reĝoj, — en ĉio estis konsenta kun kolonelo Snivin. Sed plej multe li konsentis kun tio, ke la moskvianojn la providenco destinis esti sklavoj.

— Mi bedaŭras, ke vi ne vidis belegan bildon! — prononcis kolonelo Snivin, renkontinte James-on sur ponto super Kurjo. — Vi ĝojus...

La majoro montris per tuta sia vizaĝo atenton.

— Vi tre ĝojus!

La majoro montris ankoraŭ pli grandan atenton.

— Ŝipestro Urquhart aĉetis ĉi tie piloton de la monaĥejo. Kaj, imagu, tiu bruto faris tutan batalon...

James balancis la kapon...

— Li ne deziras esti vendita. Li rezistis ĝislaste...

— Sur ilin necesas surmeti feran bridon! — diris majoro James. — Kaj punojn, verajn punojn, por ke ili timu nin, kiel negroj timas siajn idolojn...

Li ekridis, montrante bonegajn dentojn. Virino kun

malplenaj siteloj — maljuna, ĝibeta — estis tranpasanta la straton. Majoro James skurĝis ŝiajn ŝultrojn: ĉe la rusoj malplenaj siteloj estas malbona antaŭsigno.

4. Fiŝista avino

Jam tute venis tago, kiam Demĉjo vekiĝis el sia senkonscieco kaj tuj ĉion rememoris — kiel ili dibocis ĉe Magrulo kaj kiel oni surfalis poste sur la rudriston...

Terura maltrankvilo kaptis lin, li leviĝis de sur la benko, sur kiu li kuŝis, altiris al si la rufetan, senkoloriĝintan, koroditan de mara salo subsutanon kaj intencis jam vestiĝi, kiam ekmiris — kie do li estas, kial en domo kaj kio estas tiu domo?

Sed ankaŭ miri plene li ne sukcesis, — maljunulina voĉo vokis lin, kaj tuj antaŭ li aperis avinjo Eŭdoĥa — ĝiba, karesa, kun tia brilo de paliĝintaj bluaj okuloj, kia ekzistas nur ĉe tre maljunaj kaj tre bonkoraj homoj.

— Iru, se vi povas, iru, fileto, hastu, — ordonis la avino kaj donis al li mallongan kaftaneton kaj tolan pantalonon, multfoje lavitan, en oblikvaj kaj kurbaj flikaĵoj, kaj malnovan klapĉapon, kaj ankoraŭ koltukon, kian portas fiŝistoj, forirante en la maron.

Li vestiĝis, nenion demandante de avinjo Eŭdoĥa. Tiun fiŝistan vartistinon, fiŝistan vidvinon, ploristinon kaj preĝantinon, konis ĉiuj laborantoj de la mara metio ĉi tie, ĉe la Blanka maro. Se ŝi ordonas, do necesas fari; se ŝi sendas, do iru.

Hodiaŭ nokte, elirinte al krioj de fremdlandanoj, la maljunulino ekvidis apud la arsenalo la batalon, ekvidis, kiel

trenas Rjabov-on la rajdistoj, ekvidis la laman Demĉjon, kuŝantan en polvo, kaj komprenis: malfeliĉo venis al la fiŝisto, al la rudristo pro malicaj transmaraj rabistoj kaj latronoj! Demĉjon ŝi kun bonaj homoj transportis en la domon, metis sur lian kapon malvarman grundon, por ke la Dvina tero fortiru febron. Kaj nokte ŝi eksciis, ke la rudriston vendis la monaĥoj, ke la rudristo kun la novico nun estas fuĝintoj, — por kio do Demĉjo montriĝu en la subsutano? Kaj dum li dormis, ŝi preparis por li alian veston. Kaj dum Demĉjo estis obeeme vestanta sin, ne sciante ankoraŭ, kien kaj kiel li iru, ŝi estis demandanta:

— Li vinaĉon, verŝajne, en la taverno drinkis kun sentaŭguloj?

Demĉjo, ne aŭdacante malaprobi la rudriston, respondis:

— Li nur malmulte entute drinkis, avinjo, por varmiĝo...

— Mi scias lian «malmulte»...

Poste ŝi aldonis penseme:

— Estas tiele: ni laboras — neniu vidas, sed ni drinkas — ĉiu vidas.

Kaj koleriĝis:

— Kun kiu li drinkas — tion li ne scias, — jen malbono.

Demĉjo silentis, mallevinte la kapon.

— Vi iros al leŭtenanto Krikov, al Atanazio Petroviĉ, — severe diris la avino, — en la doganan domon...

— En la domon, — ripetis Demĉjo kaj ekrigardis al la maljunulino per siaj grandaj nigraj okuloj.

— Kiel kaj kio estis en la taverno kaj antaŭe, kion vi scias, ĉion rakontos. Tiel kaj tiel, rudristo Rjabov estas ŝtelita de fremdlandaj latronoj, kaj estas ordonite, diru, al vi, Atanazio Petroviĉ, de via vartistino — avinjo Eŭdoĥa — iri sur la fremdlandan ŝipon kun halebardoj, fusiloj kaj sabregoj kaj tiun rudriston nepre sur la Dvinan bordon sendifekte liveri.

Ŝi subite enpensiĝis kaj ekparolis ankoraŭ pli severe:

— Kaj se li iel kontraŭos, diru al li de mi la plej drastan vorton...

Demĉjo eĉ la buŝon malfermis pro tiu ordono.

— Inter ili tie okazis malakordo, — kunpremante la lipojn, diris Eŭdoĥa, — knabinoj, vidu, ĉe ni malmultas, ambaŭ unu saman bezonis. Do vi, Demĉjo, ne ĝeniĝu, rekte al li ĉion diru: ne taŭgas, diru, sian proksimulon en malfeliĉo lasi, kvankam vi, diru, nun estas leŭtenanto, sed Rjabov neniom pli malbonas, ol vi. Kaj ankaŭ rememorigu al li, al Ataĉjo, kiel avinjo Eŭdoĥa lin de vundo kuracis kaj elkuracis, kaj ankoraŭ rememorigu, kiel li jen tia eta al mi venadis baniĝi en kuvo...

Demĉjo ekpalpebrumis, ne komprenis.

— Ĉu vi pensas, se li estas oficiro, tiam li ne de sia patrino naskiĝis? Ankaŭ li estis eta, ankaŭ li ploregis plenvoĉe, kaj en unu sama kuvo kun Ivaĉjo Rjabov mi ilin, diabletojn, pardonu Dio, per cindro lavadis. Do ĝuste tiel diru: ne orgojlu, diru, Atanazio Petroviĉ, ni ĉiuj iam mortos — kaj oficiro mortos, kaj fiŝisto mortos, kaj ĉefepiskopo, pardonu Dio, mortos! Nu, iru, iru, lamuleto! Sed ne, li ne diros ion kontraŭ, ne tia li estas homo, ne povas esti, ke li ne faros kiel necesas. Iru, infaneto, hastu, kaj mi dume vian subsutanon orfan flikos, ĝi ankoraŭ

taŭgos, mi pensas, necesos...

Demĉjo foriris, avino Eŭdoĥa postrigardis lin, ekpensis, ĉu faros Ataĉjo kiel necesas, kaj tuj decidis: li faros nepre. Ne estis ankoraŭ tia okazo en ŝia longa vivo, ke homoj ne farus tiel, kiel ŝi petas.

Kaj kiel eblis ne fari laŭ ŝia deziro?

Dum multaj jaroj en ŝian domon oni kuŝigadis frostvunditajn senfamiliajn fiŝistojn, por ke ŝi ilin flegu. Kaj neniu iam mortis, — tia forto de patrina amo estis en tiu malgranda, ĝibeta, malforta maljunulineto al ĉiuj homoj, elturmentitaj de la mara laboro. Ŝi flegadis fiŝistajn orfojn, kreskigadis el ili fortegulojn, nutradis el korneto per likva kaĉo, kaj poste por la juna fiŝisto ŝi la unua aĉetadis botojn por maro, varman ĉemizon; ŝi mem adiaŭadis la boaton, sur kiu la infano foriradis por fiŝado...

Avino Eŭdoĥa en sia malalta oblikviĝinta kabano kuracadis terurajn fiŝistajn malvarmumojn, dolorojn, febrojn. Kaj ne per sorĉitaj herboj, ne per magio, sed per granda forto de deziro helpi, faciligi suferojn, ne lasi morti al bona homo, mara laboranto, sentima fiŝisto...

Ĉiujn ŝiajn parencojn prenis la maro. Kaj la maljunulino ne havis eĉ tombojn, por plori sur holmeto, por ĝustigi la krucon, flustrante, kiel iuj vidvinoj kaj patrinoj, plendojn pri sia soleca maljuneco, pri tio, ke en la domo estas malvarme, kaj jam mankas fortoj por fendi brullignon, pri tio, ke malfacilas paŝi — ne fleksiĝas la malsanaj kruroj. Ŝi havis nenion, krom arda, kvazaŭ bolanta amo al ĉiuj, al kiuj la vivo ne donis sufiĉe, al ĉiuj orfoj kaj mizeruloj, al ĉiuj soluloj kaj malsanuloj...

Severe kaj malmilde kompatadis Eŭdoĥa. Dolore punadis ŝi pro malbonaj aferoj. Ŝi nur diradis:

— Aj, maltaŭge vi faris, fiŝisto!

Kaj kovriĝos per honta ŝvito, moliĝos rufa knabego, falos al la piedoj, ekkrios:

— Batu min, avinjo! Batu, sed indulgu! Pardonu, avinjo...

Sed la avinjo ne indulgadis. Ŝi scipovis silenti. Kun ofendintoj ŝi silentadis dum jaroj. Ŝi scipovis ankaŭ laŭdi. Kaj same nelonge. Ŝi diras kun sia radia rideto vorteton, kaj kian vorteton — ne distingas la laboranto de la Blanka maro, sed flugas de Eŭdoĥa kvazaŭ sur flugiloj kaj nur pensas: «Jen avinjo, jen maljunulino, jen kolomba animo».

Iam en ŝian kabanon, kie ronronante promenadis katoj, trovitaj en postkortoj, kie snufadis erinaco-invalido, kie pace kunvivadis blinda leporo kaj maljuna virkoko, venadis flegita iam de ŝi altkreska, larĝŝultra, purpura pro malvarma mara vento fiŝisto, klinsalutadis per ĝiszona riverenco, diradis:

— Estu sana je ĉiuj kvar ventoj, avinjo! Jen al vi donaco!

Li metadis sur la puran, priskrapitan tablon altinon, kaj ankoraŭ altinon, kaj kopekojn, kiom estis pakita en la tuko — tiom li elŝutadis. Okazadis, ke oni metadis ankaŭ ormoneron, vidis la maljunulino ankaŭ fremdlandajn monerojn. Sed nelonge ili restadis ĉe ŝi. Kiel reteni monon, se apude, en najbara domo, ploras, larmas fiŝista vidvino, mankas per kio nutri la infanetojn? Kiel reteni, se morgaŭ eblas venigi al si dekon da etaj infanoj, bani ilin en kuvo kun cindro kaj sablo, kaj rekompence pro pacienco kaj obeemo, pro tio, ke ili ne ŝrikis kaj kondutis dece, manĝigi ilin ĝissate per vianda kaĉo,

per grasa fiŝsupo, per aroma spickuketo?

Iam ŝi flegis Demĉjon, kaj pli frue, en malproksimaj jaroj, la rudriston Rjabov-on mem, post kiam li frostiĝis en aŭtunaj noktoj en malproksima fiŝista bazo. Kaj jen venis al ŝi iam Ivano Sabateiĉ, larĝe malfermis la pordon, diris:

— Estu sana je ĉiuj kvar ventoj, avinjo! Jen, oldulineto, donaco!

Li malligis saketon, elŝutis sur la tablon oraĵojn, ekruliĝis sur la priskrapitaj tabuloj moneroj, ringoj de brilanta oro, falis sur la plankon perloj.

— Ĉu vi ion malbonan faris, Ivano? — severe demandis la maljunulino.

Rjabov subridis:

— Ŝipo sur rokojn elĵetiĝis, — diris li, — fremdlanda ŝipo. La homoj ĉiuj estis mortintaj, ĝis la lasta; jen mi kun fiŝistoj trovis trezoron, sed por kio ĝi? Kandelon grandan mi metis al Sankta Nikolao, al vidvinoj donacis, diboĉis iomete ĉe Magrulo, botojn por mi novajn aĉetis, kaftanon. Nun mi al homoj la okulojn pikas — jen, belvestiĝis Ivaĉjo Rjabov...

Li denove subridis per sia pigra subrido.

— Ne deziras mi mem iĝi mastro. Boaton aĉeti, ŝnuraron, fiŝistojn dungi, ĉu? Kiel vi konsilos? Ĉu devenos el mi mastro?

— Ne devenos, Ivaneto! — funebre diris la maljunulino. — Senhontecon vi ne havas!

— Sed diabloj ja puŝas, — ridetante parolis Rjabov, — tiel dolĉe persvadas: iru, Ivaĉjo, en mastrojn, sufiĉas al vi malfeliĉi, jen fortuno al vi venis, duan fojon tio ne okazos...

Li tiris sin, oscedis, iris hejti banejon, kaj poste estis sidanta ĉe la tablo pura post ŝvitbano, trinkeganta varmegan, forte pipritan fiŝsupon kaj diranta:

— Ni iros en la maron, ni vidos. La maro, avinjo, de la origino estas nia kampo. Estos fiŝo — estos ankaŭ pano. Kaj sangosuĉanto el mi ne devenos, ĝuste vi diris — por tio necesas senhonteco...

La maljunulino, apoginte sin per la pugno, ĉiam kapjesadis kaj suspiradis, poste subite por momento larmis kaj kvazaŭ koleriĝis. La oron kaj juvelŝtonojn ŝi dividis je du duonoj: duonon por malfeliĉaj orfoj, alian duonon ŝi enfosis en la legomĝardeno — por ajna okazo, kiu scias, kia malfeliĉo falos sur la rudriston?

Por siaj orfoj kaj malfortuloj avino Eŭdoĥa neniam petadis ion de iu — tiel ŝi ĵuris. Fiŝistoj mem alportadis al ŝi, kiu kion povis: iu — fiŝon, iu — monon, iu — farunon, iu — buteron. Laŭ antikva moro homoj faradis ankaŭ kaŝitan almozon: la avino trovadis en sia vestiblo jen bonan pecon de frostigita bova viando, jen kandelojn, jen varman kaptukon.

Pro la donacoj ŝi neniam dankadis.

Kaj ne estis en Blankmario homo, kiu ne rememorus ŝin en bona aŭ malfeliĉa horo.

Severaj brigadaj rudristoj, solvante malfacilan aferon, konsiliĝadis kun ŝi kaj, elirante el ŝia kabano, diradis:

— Jen maljunulino! Vera vojevodo! Pli ruza ne ekzistas!

Multajn familiajn malpacojn ŝi same solvadis, kaj ŝia vorto estis firma, lasta, definitiva. Popoj timetis rigardon de avino Eŭdoĥa, ŝian pikan subridon, salan ŝercon. Komercistoj en

bazaro riverencadis al ŝi pli malalte, ol al aliaj...

5. Estos deklarita konfuzo!

Demĉjo eliris, pririgardis sin, ĝojis pri la kaftaneto kaj ekiris al la domo, kie loĝis doganaj oficistoj, soldatoj de la dogana taĉmento kaj kie malsupre estis apartamento de sinjoro Krikov Atanazio Petroviĉ — leŭtenanto de la dogana militistaro.

Frapinte al la pordo singarde kaj respekte, Demĉjo aŭskultis iom kaj ankoraŭ foje frapis. Respondo ne estis. Tiam Demĉjo ŝovis la kapon en la ĉambron kaj, ekvidinte neniun, eniris.

La plankon estis kovranta trivita tapiŝo kun leda kuseno — ĉi tie, evidente, la leŭtenanto dormadis. Sur la benko kuŝis libroj. Unu el ili estis malfermita. Demĉjo legis: «Amo kolomba kaj infero de pasioj, brulantaj en la brusto de Pelaida kaj Bertramo». Pro tiaj vortoj Demĉjo ruĝiĝis.

En la apuda ĉambro iu estis ternanta kun forto kaj ĝuo, aldirante:

— Kaj ankoraŭ fojon! Kaj ankoraŭ bonan! Kaj ankoraŭ fortan!

Poste la ternado ĉesis, io grincis...

— Sinjoro! — nelaŭte vokis Demĉjo.

Trans la pordo daŭris la grincado.

Demĉjo faris kelkajn mallongajn paŝojn, rigardis trans la pordon.

Meze de la malgranda ĉambro ĉe tablo estis faranta ian etan laboron per la fortaj, lertaj manoj Atanazio Petroviĉ mem. Lia vizaĝo, turnita al varma lumo, radiis rideton, kvazaŭ li ĝojis pri

sia laboraĵo; ja ĝuste tiel estis: jen li prenis per du fingroj ion etan, gajan, blankan, turnis antaŭ si kaj tute ekĝojis, eĉ ŝmacis per la lipoj, sed tuj kvazaŭ rimarkis malbonaĵon en sia faraĵo, komencis piki ĝin per aleno, aldirante:

— Kaj tion ĉi ni forigos, forpurigos...

Demĉjo frapis per la pordo...

La vizaĝo de Krikov momente ŝanĝiĝis: rapide ŝovinte sian laboraĵon en la sinon, li formetis tranĉiletojn kaj alenojn, kovris ilin per la granda polmo kaj turniĝis al Demĉjo, malŝate kunpremante la lipojn:

— Kial vi? Pro kia afero? Kial sen demando enrompiĝas? Ĉu mirindas, ke mi kvieton ne havas en la domo propra eĉ unu minuton? Kial tio?

Demĉjo konfuziĝis, ruĝiĝis, ekbabilis galimation, kiel ĉiam, kiam oni lin ofendas.

La leŭtenanto frapetadis per la piedo, liaj helaj okuloj rigardis preter la junulo, sub lia maldika haŭto, kiel ĉe multaj dvinanoj, brulis forta ruĝo. Li diris kolere:

— Parolu pri la afero, sufiĉas babili sensencaĵojn...

— Kiel vi bonvolas demandi, tiel mi respondas! — diris Demĉjo, ekreginte sin. — Kaj mia afero estas jena...

— Sidiĝu do! — ordonis la leŭtenanto.

Demĉjo ne eksidis, ofendita.

La leŭtenanto aŭskultis atente, rigardis rekte en la okulojn, ĉiam pli forte kunpremante la lipojn, ĉiam pli malmole frapante per la altboto.

— Ĉu vi ĉion diris?

— Ĉion.

— Kial vi al mi venis?

— Avinjo Eŭdoĥa sendis.

En la okuloj de Krikov glitis fajrero, sed kvazaŭ hontante pri ĝi, li forturniĝis, deŝiris kaftanon de sur ligna hoko, zonis sin per skarpo, kriis al servosoldato tamburi kunvenon. En la korto ektondris tamburo, la servosoldato tuj alkuris por preni ŝlosilojn...

— Infero vin prenu! — koleriĝis la leŭtenanto. — Tedis al mi viaj ŝlosiloj...

Kaj klarigis al Demĉjo:

— Se ne ŝlosi per ŝlosilo, forkuros miaj doganaj soldatoj. Kolonelo nun ĉi tie estas Snivin; la monon, kiu venas de la ŝtato por nutrado — li tutan forprenas. Tial la soldatoj nutriĝas, kie kiu povas...

Supre oni ekkuris, ree knaris la pordo, eniris nudpieda kaporalo Jeropkin, demandis:

— Kiel vi ordonos, Atanazio Petroviĉ, ĉu iri aŭ ne iri? Mi en la hieraŭa tago la botojn fordonis — por plandumojn alkudri, ili tute truiĝis. Kion do mi faru?

Atanazio Petroviĉ en medito gratis la kapon:

— Alkudri, alkudri! Jen, prenu la miajn, provu!

Kaporalo Jeropkin eksaltis tra la ĉambro, surmetante la leŭtenantan boton. Li iel-tiel sukcesis. Promesis:

— Mi ĝisiros!

— Do, tiele! Vicigu la knabojn!

En la korto la kaporalo kriis per besta voĉo:

— Hastu, viroj, tiel vi ĝis la nokto ne sukcesos!

Atanazio Petroviĉ estis malgaje diranta al Demĉjo:

— Ĉu eblas tiel plenumu la caran servon? Estas nek muskedoj sendifektaj, nek bajonetoj, nek pulvo, nek stano, nu, nenio! Sen vestoj, sen ŝuoj, dum longa tempo la nutra mono ne venas. Kion mi povas postuli de ili, de miaj soldatoj? Sed la knaboj ja estas oraj. Super ni staras la estro — fremdlandano majoro James. Kiam li venas, tiam batas ĉiujn al la dentoj, sangon verŝas, dentojn elbatas, sed por kio? Diras, aspekto malbona! Sed kie ili prenu aspekton, kiam kolonelo Snivin tutan ilian aspekton en sia ŝparmonujo tenas kaj al neniu montras...

Ili eliris, kiel decas, kun malgranda standardo — flageto kaj sub tamburado. Antaŭ la pordego ili viciĝis: la unua estis Krikov kun spado, post li la kaporalo kun la tamburo, poste vice tri soldatoj, aparte Demĉjo. La tamburo batis ofte, la soldatoj levadis polvon per la piedoj, poste kuradis nudventraj knaboj, fajfadis, grimacadis.

Ŝipestro Urquhart sur la ferdeko, sub markezo, por ke la suno ne bruligu la kapon, estis skribanta dokumentojn; la eskortanto Garrit Koost — nuda ĝis la zono, harkovrita — estis trinkanta citronan akvon, sidante super ŝaktabulo. Urquhart, skribinte iom, rigardadis al la ŝaktabulo per dolĉaj okuloj, klininte la kapon flanken, subite movadis pecon kaj ree skribadis. Koost ektimadis, mordadis la lipharon...

Ekvidinte Krikov-on kun la tamburisto, kun la kaporalo, sub

la flirtanta flageto, Urquhart leviĝis kaj ekiris renkonten sen rideto, mallarĝigante la okulon.

Ne permesinte al la ŝipestro diri eĉ vorton, Krikov ordonis al Demĉjo traduki: hodiaŭ nokte per forto estis prenita rudristo Rjabov Ivano, tiun rudriston necesas eldoni bonvole, kaj se tiu rudristo ne estos tuj ĉi tie, antaŭ la okuloj de la leŭtenanto, tiam li, Krikov, deklaros al la ŝipestro grandegan konfuzon kaj signos ĉi ŝipon krima.

Demĉjo, balbutante pro emocio, tradukis.

Urquhart ekrigardis lin atente — rekonis, pli mallarĝigis unu okulon kaj, ludante per la dika, fortika piedeto en ŝuo kun banto, eldiris:

— Por mia grandega bedaŭro, la konfuzon ricevis hieraŭ de mi sinjoro leŭtenanto mem; kaj meritas miron, ke tiu konfuzo ne malvarmigis la batalan ardon de mia amiko sinjoro Krikov. Mi devos viziti sinjoron vojevodon mem kun peto pri defendo, ĉar tiel ne povas plu daŭri. Kio koncernas piloton Ivanon, do li, vere, dungiĝis al mi por servo, sed fuĝis kune kun tiu ĉi tre inda junulo, — la ŝipestro per la kapo almontris Demĉjon, — fuĝis, malgraŭ tio, ke lia estro — la sankta patro — sukcesis ricevi bonan monon kiel partan antaŭpagon. Mi supozas, ke estas en la moroj de la moskvianoj agi ĝuste tiel...

Krikov ne permesis al Demĉjo fintraduki, interrompis lin:

— Diru al ĉi kanajlo, — ruĝegiĝante, prononcis li, — ke ne li, sata ŝtelisto, malgloru kaj malhonoru Moskvion kaj se li, grasa muzelo, almenaŭ unu vorton bojos pri ĉi temo, tiam mi lin per la spado trapikos kaj en la akvon ĵetos... Ĝuste tiel diru... Haltu, atendu, ne diru...

Li pensis, trankviliĝis kaj ordonis traduki alion:

— Pro tiu falsa arĝento, kiu estis ĉe li kaŝita en bareloj sub la farbo, ne estas al li nun fido pri ĉio kaj ne estos, dum mi ĉi tie la caran servon plenumas...

Demĉjo tradukis.

— Ne ekzistas plia fiaĵo, ol al nescianta, senkulpa laborulo pagi ties laboron per monero, kiu estos sur forta fajro fandita kaj al la laborulo en la gorĝon enverŝita, sed pro kio? Pro lia, ŝipestra, dolĉa vivo. Traduku!

La tradukisto tradukis.

— Li starigu la ŝipan rudriston Rjabov-on Ivano ĉi tien antaŭ ni.

— Ĉi tie ne estas Ivano Rjabov! — klininte la kapon flanken, ridetante kun supereco kaj orgojlo, respondis Urquhart.

— Sed ne, ja estas! — ekkriis Krikov kaj ordonis bati la tamburon.

La kaporalo batis ruladon per ambaŭ bastonetoj. La okuloj de Krikov ekbrilis, kiel de bona ĉasisto. Li etendis la kolon, ĉirkaŭrigardis, pensante, kaj intencis jam iri, kiam subite la ŝipestro ree nelaŭte ekparolis:

— Sinjoro, — diris li, — via ago estas almenaŭ negastama, kaj, malgraŭ ĉiuj miaj bedaŭroj, mi faras al vi propozicion kaj averton: la urbo Arĥangelsko atendas caron Petron, kaj al lia cara moŝto estos donita mia plendo pro malleĝa dua dogankontrolo de mia ŝipo.

Demĉjo tradukis.

— Ĉu propozicion? — redemandis Krikov.

— Propozicion! — konfirmis Demĉjo.

— Li faru al mi propozicion, se mi Rjabov-on ne trovos, sed se mi trovos, tiam li memoru: estos deklarita konfuzo.

6. Ni homojn ne vendas!

La doganaj soldatoj staris kaj sur la ponto, kaj sur la pobo, kaj sur la pobferdeko. Ĉe la ŝtuparo la kaporalo kun la flageto en la mano kraĉadis en la akvon.

Ferdekestro del Robles flustre diris al ŝipestro Urquhart:

— Tiun damnitan moskvianon eblas pikmortigi, kaj neniam iu ekscios tion...

— Sed kien vi kaŝos la korpon, mia amiko?

La ferdekestro pripensis:

— La korpon eblas ĵeti en Dvinon, alliginte al la piedoj pezaĵon...

— Kaj ĉu neniu rimarkos tion?

Del Robles suspiris.

— Suspiroj ne helpos al la afero! — diris seke Urquhart. — Mi, eble, sukcesos elturniĝi, sed vi, mia amiko, devas esti preta al tio, ke en Moskvion vi ne plu iros...

Del Robles acide subridis.

Jam venis vespero. Krikov plu prifrapadis ŝipajn fakmurojn — serĉadis kaŝejon. Du soldatoj, ŝvitaj pro sufokeco, fosadis en la holdoj — kontroladis varojn, prifrapadis barelojn, kestojn, renversadis sakojn. Fremdlandaj ŝipanoj rigardadis,

subridante.

Antaŭ nokto Krikov trovis Rjabov-on en artifika kaŝejo, konstruita sub bareloj kun trinkakvo. La kesto estis tegita interne per felto, por ke ne estu aŭdeblaj plendoj, ĝemoj kaj krioj. Rjabov kuŝis preskaŭ senkonscie, ligita ĉe la manoj kaj la piedoj, kun buŝoŝtopilo.

Tranĉinte per tranĉilo la ŝnurojn, Atanazio Petroviĉ trinkigis la rudriston per akvo, viŝis per sia tuko lian ŝvitan vizaĝon, silente frapis al la ŝultro kaj elkondukis sur la ferdekon, ĝuste sur tiun ferdekon, kie tiel antaŭnelonge la ŝipestro diradis altajn vortojn pri bonega rusa piloto. Demĉjo, plorante kaj ne hontante pri la larmoj, ĵetiĝis renkonten. Rjabov estis ofte spiranta, larĝe malfermante sian vunditan, sangantan buŝon.

— Nu, propozicio! — laŭte diris Krikov. — Traduku al li, Demetrio! Al ĉi ŝipo estas deklarata konfuzo, ĉe la ŝtuparo staros niaj gardistoj, tiuj gardistoj estu nutrataj per mono de la ŝipestro, neniu rajtas eniri sur la ŝipon kaj eliri el la ŝipo, kaj poste ne rajtos.

— Ĉu tiel? — demandis Urquhart.

— Jes, jen tiele, — diris Krikov.

— Sed mi estas tute senkulpa! — diris Urquhart. — Mia ferdekestro kverelis kun via piloto kaj kruele ŝercis kun li. Ĉu povas la ŝipestro respondi pri agoj de siaj homoj?

— Se ne povas, tiam instruiĝu! — diris Krikov. — Se ne instruiĝis en aliaj landoj — ni ĉi tie instruos.

La ĉefa ferdekestro eliris antaŭen, diris laŭte, almontrante per la mano Rjabov-on:

— Tiu homo estas nia homo. Kontraŭ li estis pagita de mi granda mono, pri kio la ŝipestro havas plenforman kvitancon. Vi ne rajtas forkonduki tiun homon, venditan al ni kiel matroso, kaj se vi forkondukos — ni iros al via caro. Ni aĉetis tiun homon...

Krikov paliĝis, kunpremis la spadan tenilon, kriis:

— Vi povas aĉeti vivan linkon, gulon aŭ lupon. Sed tiun ĉi indan piloton vi ne ricevos, ĉar ni homojn ne vendas!

— Ĉu vere? — demandis Urquhart. — Sed multaj miaj amikoj aĉetadis al si homojn en Moskvo kaj en aliaj urboj. Jen ankaŭ ni aĉetis vian piloton, sed vi forprenis lin de ni per forto. Ni plendos al lia cara moŝto, kaj vi ne estos rekompencita pro tio...

Li turnis la dorson al la leŭtenanto, montrante plenan neglekton al tiu.

Post malgranda tempo Krikov, Rjabov kaj Demĉjo jam estis sur la bordo. La soldatoj restis gardi la ŝipon. La vespero estis sufoka, la ĉielo estis kovriĝanta per nuboj, Dvino kuŝis tute senmova, griza, folioj sur betuloj ne moviĝis...

— Dankon, Atanazio Petroviĉ! — malfacile diris Rjabov. — Mi neniam forgesos. Mi pereus sen vi.

Li ne rigardis al Krikov, ne kutimis danki. Krikov same sidis sur la bordo, forturniĝinte, — li ne scipovis aŭskulti, kiam oni dankas.

— Eble, ni kvitiĝos! — respondis Krikov.

— Eble, ni kvitiĝos. En Rusio kia estas pago, tia estas repago.

Ili silentis iom.

— Tre baldaŭ ĉi tien venos lia cara moŝto Petro Aleksejeviĉ kun kamaradoj, — diris Krikov, — mi scias pri tio ĝuste. Ili venas por maraj amuzoj, estas ordono voki ĉiujn homojn de la ŝipa metio... Unu savo por vi estas, rudristo, atendi la caron. Alie oni vin murdos.

— Murdos! — trankvile konsentis Rjabov.

— Tro multe vi bruis hodiaŭ. Demĉjo rakontis, kiel vi nokte diboĉis...

— Bruis! — konsentis Rjabov.

— Vere, bruis. Kaj al la ekonomo duonon de la barbo elŝiris. — Krikov subridis. — Ne forgesos la ekonomo la barbon, ne pardonos.

Rjabov humile suspiris.

— Ne pardonos.

Ili ankoraŭ silentis iom.

— Kion do fari? — demandis Krikov. — Kaŝi vin necesas por tempo, sed kie?

— Ja ĉe vi kaŝu! — subite diris longe silentinta Demĉjo. — La plej konvena loko estas en la dogana domo, sinjoro, al neniu eĉ ideo venos, ke oĉjo estas ĉe vi.

Krikov silentis, pensis iom, poste diris:

— Estu laŭ vi. Kune ni ne iru, tio ne taŭgas, sed vi poste, kiam nubo venos, sub pluvo, eble, tra malantaŭaĵoj venu.

Li leviĝis kaj ekpaŝis laŭlonge de Dvino, kaj Demĉjo kun la rudristo ankoraŭ longe sidis super la rivero, interŝanĝante per

unu aŭ du vortoj, silentadis, ree interparoladis, pensadis, kiel ili vivu plu kaj kial tiel aranĝiĝis la sorto.

— Dio, eble, tiel ordonis! — humile diris Demĉjo.

— Dio? — demandis Rjabov. — Ial de longe mi ne aŭdis pri li, pri via Dio, — eble, vi rakontos?

Demĉjo kun timo ĵetis rigardon al Rjabov kaj eksilentis por longe.

Ĉapitro kvara

Mensog' sur lang' de malamik',
Dum mano pri malam' alarmas,
En buŝo nur vantaĵoj svarmas...
Lomonosov

Ne amu jesanton — amu kontraŭanton.
Proverbo

1. Kie estas la justo?

Rekrutita al la cara servo Atanazio Krikov tuj trafis al doganistoj kaj dum ne pli ol jaro montris veran talenton en tiu malfacila kaj komplika afero. Sian neordinarecon li klarigadis simple: mi, diradis li, de la patro estis instruita ĉasi ekde eta aĝo, ne ekzistas tia besta ruzaĵo, kiun mi ne divenus, kaj fremdlanda negocisto ne estas pli ruza, ol tajga vulpo. Pensi, certe, necesas, ne sen tio...

Bestojn li vere konis, sciis iliajn kondutmanierojn kaj kutimojn, kaj de antikvaj tempoj, kiel Rjabov-oj famis per rudristoj, tiel Krikov-oj per ĉasistoj. Tamen, la prauloj de Krikov ankaŭ en la maron iradis ne malpli bone ol aliaj...

Ekde la prapatroj Krikov-oj ĉasadis en tundro, timante nek ĥiuson — hurlantan blizardon kun flankaj fajfantaj neĝventoj, nek malsekan neĝan ŝtormon — riandon, nek ĉidegon — densan pluvon kun malvarma vento. Sub brilantaj je la tuta ĉielo lumoj de norda aŭroro Krikov-oj iradis en bando-brigado ĉasi ermenon — sangavidan besteton, irantan lavange, vorantan siajn malfortajn fratojn. Krikov-oj iradis longe, ĝis

sekreta pado, por meti kaŝitajn specialajn kaptilojn por ermena gvidanto. Se trafis la gvidanto en la kaptilon, pezaĵo alpremis ties kapon — disŝutiĝos, timiĝos la ermena lavango: unu post alia trafos la bestoj en la kaptilon, mankas super ili estro, ne estas ĉefo!

En la sama sezono estas kaptataj en la tundro flavaj musteloj — karaj peltoj. Tiam rigardu atente, aŭskultu taŭge; se vi ne estas dotita per talento ĉasi mustelon — vi revenos hejmen malplena. La besto kuŝas en sia nesto, siajn kantetojn kantas pro vintra enuo, ronronas, — tie ĝin fosu, disfosu la terneston, sed antaŭe ĉiujn pasejojn kovru per firma reto...

Post mustelo estas blanka vulpo, tiun ĉasi oni iradis mare al Grumanto. Bizara besteto, ne ĉiu ĉasisto povas mortigi ĝin. Ekvidinte direktitan al si tubon de muskedo aŭ sagon, elturmentita per persekuto besto, okazas, ne leviĝas de sur sia loko — kuŝas senmove, kaj eĉ per la piedetoj kovras la muzelon, por ne vidi sian finon. Tian vulpon Atanazio ne povis mortigi, same kiel ne povis rompi krurojn al vulpidoj, por kreskigi vulpon kun sendifekta felo, kiel ankaŭ ne povis mortigi vulpon per piedbato al la koro, por vendi glatan felon. Aliaj mokis lin, Atanazio nur kraĉadis responde. La patro intencis instrui lin iomete — Atanazio tiel movis la okulojn, ke la maljunulo pri tio eĉ ne plu ŝercis...

Kiam la patro mortis, la bando de la bestoĉasistoj disfalis.

Atanazio akiris ĉasboateton, lancon-harpunon kun rimeno je kvindek klaftoj, grandan bareleton el rosmara ledo kaj ekintencis ĉasi rosmarojn.

Sola ne eblas iri al ĉasado: foje li trovis amikon — homon «kun kaŭzo», kiel tiu pri si mem diris. Nigra, fortika, malalta,

kun vizaĝo kovrita de malmola krispa barbo, kun ĉiam mokema okulbrilo sub la vilaj okulharoj, tiu homo plej multe silentadis kaj pri io malgaje subridadis, kaj kiam li subite ekparolis, Atanazio Petroviĉ unue eĉ ne kredis al siaj oreloj: lia remisto evidentiĝis fuĝinto, kaj eĉ ne simple fuĝinto, sed ankoraŭ torturita pro krimaj malamaj vortoj, diritaj kontraŭ bojaro, kaj eĉ ne simple diritaj, sed diritaj kun tranĉilo en la mano, kiam Paŭĉjo Silentulo aŭdacis levi tranĉilon kontraŭ sia bojaro princo Zubov. La princo-bojaro per sia juĝo kondamnis bati lin per bastonoj senkompate kaj intencis eĉ elŝiri la naztruojn, sed la krima servutulo naskiĝis ne stulta — li ne atendis sian morton, subfosis la tenejon, kie li sidis sub gardo, kaj fuĝis...

— Ĉu vi foriris? — miris Krikov.

— Pro tio mi estas viva...

— Vere...

Atanazio Petroviĉ sidis en la boato, simplanime miranta, palpebrumadis.

— Kunpremu la lipojn ja! — ordonis Silentulo. — Jen, kvazaŭ freneziĝis...

— Eblas freneziĝi...

— Vi povas ne timi, Atanazio Petroviĉ, se estos io — vi tute ne scias, ne konas, — sur mi ne estas skribite, ĉu mi estas fuĝinto aŭ ne...

Krikov tiutempe ekvidis rosmarojn, kiuj estis gratantaj sin sur ŝtona bordo. Vento estis blovanta de la bestoj, Silentulo ekpremis la remilojn. Krikov kun la malpeza harpuno en la mano senmoviĝis sur la boata pruo. La gardanta rosmaro estis

dormetanta. La ceteraj dormegis. Atanazio pufigis la naztruojn, kriis, la rosmaroj ekmoviĝis, kun forta mallonga fajfo la harpuno enpikiĝis per la ŝtala pinto en la postkolon de rosmaro — de la plej matura, dentega, grasa.

Silentulo, mordinte la lipojn, brilante per la pupiloj, elĵetadis la ledan ŝnuron — klafton post klafto, — la rosmaro penis liberiĝi sub akvo. La boateto jam estis trenata en la maron.

Nur antaŭ nokto ili venkis la beston, kondukis ĝin malvivan al la bordo — por diskarnigi. Matene, kiam ili manĝis likvan kaĉon, Silentulo diris:

— Eĉ unu homo en la mondo ne scias, kiu mi estas kaj de kie. Ankaŭ mi mem ne scias, pro kio mi konfesis al vi. Ĉu pro tio, ke vi prenis min ne kiel dungiton, sed kiel kamaradon, ĉu pro tio, ke sur mi estas via ĉapo, ĉu pro tio, ke vi estas simpla, kaj mia animo sidas kun vi, kvazaŭ en kuseno... Aŭskultu plu! Ne mi sola estas tia en Arĥangelsko, kaj en Ĥolmogoro, kaj en aliaj viaj bordaj setlejoj. Multas ĉi tie fuĝintoj...

Krikov aŭskultis silente. Pri la kaĉo li forgesis — rigardis en la severajn okulojn de Silentulo, la koro sangis, kvazaŭ per malrapida vico estis pasantaj antaŭ li la homoj, pri kiuj estis rakontanta Paŭĉjo.

— Kion ili deziras, tion faras kun ni la turmentantoj, — estis parolanta Silentulo. — Se vi riverencos malĝuste — vi estos batita en la bojara ĉevalejo ĝismorte. Se la tero ne donis rikolton — knutojn, se vi ne plenan tributon veturigis al bojara grentenejo — bastonojn, la ripojn oni frakasas, tortur-pendigas, la lastan moneron el sub la vango elŝiras per tenajlo. Knabinojn niajn en siajn kortojn ili trenas, malhonorigas; se plaĉos iu — el honesta nupto ŝtelas, poste — al fora brutejo...

Silentulo grincis per la dentoj, rompis bastonon kontraŭ la genuo, ĵetis en fajron.

— Kie estas la justo? Kiel trovi ĝin, kiel vivu homo?

— Sed kie ili estas, viaj fuĝintoj? — demandis Krikov.

— Ĉie. Ili dungiĝas je ajna pago, je nutrado. Ĉu kiel remistoj, ĉu kiel logaĵistoj, por ili ĉio egalas. Al foraj ermitejoj ili fuĝas — kiel Di-servantoj. Dum estas fortoj, tiu vagas kun dorsosako basta; poste li kuŝos, manĝos berojn, fungojn, poste kie ajn — ĉu sur lago aŭ ĉe maro — domon konstruos, kabanon aŭ terkabanon...

— De kie do ili venas?

— De Moskvo kaj de Kostromo, de Kalugo kaj Vjazjmo, de Kursko kaj Jaroslavlo...

— Kaj ĉiuj ĉi tien?

— Kial ĉiuj. Ankaŭ al Dono ili iras, kaj al Volgo-patrino, al la malsupro, kaj trans la Grandan Ŝtonon[45]...

— Kaj se oni kaptos?

Silentulo malgaje subridis:

— Kaptos? Tiam bonon ne atendu...

Li ĉerpis la kaĉon, maĉis, poste konsilis:

— Manĝu, ĝis ĝi tute ne malvarmiĝis...

Ili finmanĝis la kaĉon senvorte, kunmetis la ekipaĵon, ŝarĝis, eknavigis al la urbo. Atanazio Petroviĉ estis pensema, malgaja, distrita. Ekde tiu ĉi okazo li amikiĝis kun Silentulo kaj longe konversaciadis kun li. Kaj aŭtune Atanazio Petroviĉ ekservis ĉe

45 Trans Uralon, t. e. en Siberion. *(trad.)*

la dogana leŭtenanto — fremdlandano sinjoro James.

2. Batu senkompate, ĝis li krios!

Sinjoro James akumuladis monon por akiri licencon pri militista rango en sia angla reĝlando. Por tio li devis servi al la moskvianoj dum ankoraŭ ses jaroj. Tiun daŭron li mallongigadis per koruptaĵoj, supernormaj depagoj kaj ĉiaspeca uzurado, kaj ankoraŭ per tio, ke li penis vivi en la fora urbo Arĥangelsko kun plena komforto, tute nenion rifuzante al si. Li multe dormadis, longe ludadis liuton, okupiĝadis kun dresita hundeto, legadis la Biblion kaj por pasigi tempon iam invitadis al si fraŭlinojn, kun kiuj li krakmaĉadis rostitajn nuksojn kaj ludadis galantajn ludojn. Grandan tempon James konsumadis ankaŭ por klopodoj pri sia aspekto: per speciala peniko el malmolaj haroj li nigrigadis siajn rufajn brovojn, kaj per alia peniko metadis apud la nazo muŝon. Siajn vangojn li ruĝumadis, la manojn, por ke ili estu pli malmolaj, ŝmiradis per ursa graso. Sur lignaj formiloj ĉiam estis etenditaj sep liaj perukoj, nomataj laŭ semajntagoj: «lundo», «mardo», «ĵaŭdo», «dimanĉo»... Du doganistoj estis gardantaj liajn kaftanojn, kamizolojn, ŝtrumpojn kaj ŝuojn. En bonaj tagoj la kofroj de leŭtenanto sinjoro James estis malkovrataj kaj tuta lia havaĵo estis pendigata sub la suno. La doganistoj nepre ĉeestadis tion. Se en kamizolo troviĝadis tineo, la servosoldatoj estis vipataj senprokraste, en la angla maniero — per krudleda rimeno kun nodoj.

El urbo Plimuto sur ŝipo «Feliĉa papilio» al James estis liverita portseĝo.

Kiam la portseĝon oni alportis en la doganejan korton, la leŭtenanto kunvenigis la soldatojn kaj diris al ili mallongan paroladon:

— En mia belega patrujo, — prononcis li, — bonhavaj homoj preferas tiun ĉi bonegan aĵon al ajna rasa rajdoĉevalo. Ĉu vi vidas — kiel ĉi tie ĉio estas saĝe aranĝita? Tiujn oportunajn mantenilojn tenas la portistoj. Ĉi tie estas kvar manteniloj — sekve, vi portos min kvarope. Kvar el vi akompanos mian portseĝon por ŝanĝi unu la alian. Vi ŝanĝiĝados dum irado. Kaj ĉi tie...

Li malfermis la pordeton kaj montris al la doganistoj la internaĵon de la portseĝo:

— Ĉi tie por mi ĉio estas tre oportuna. Jen mola sidilo. Mi povas ankaŭ etendi la krurojn. La muroj estas tegitaj per ledo, tial interne ĉiam estas seke. Ĉi tie, kiel vi vidas, eblas teni pipon, ĉi tie estas loko por bierbotelo. Tio estas bonega, komforta, tre firma aĵo. Al vi restas nur disponigi ok homojn, kies tasko estos porti min, kiam mi tion deziros...

James foriris en la domon. La soldatoj restis en la korto. La portseĝo, brilante per lakita ledo kaj ortavolo, per glimo kaj per kapoj de kupraj najloj, staris sur renversita sledo.

— Kiu do portos lin? — demandis Atanazio Petroviĉ.

La doganistoj, ne respondante, komencis disiri. Matene James demandis — ĉu oni disponigis al li portistojn. Krikov morne respondis, ke portistojn disponigi ne eblas.

— Kial tiel — ne eblas?

— Ili ne portos.

— Ĉu vere ne portos?

James ridetis. La tamburisto tamburis kunvenon. Komenciĝis ekzekuto. Estis vipita ĉiu dua. James mem kalkulis batojn. Post la vipado li ordonis, ke portistoj tuj kunvenu ĉe lia perono. Ne troviĝis eĉ unu portisto. La leŭtenanto plendis al Snivin. Tiu elaŭskultis lin morne, suspiris kaj konsilis forlasi la ideon kun la portseĝo.

— Sed, sinjoro! — ekkriis James.

— Ili en la plej bona okazo ĵetos vin kune kun via portilo en Dvinon. Certe, ni ilin pro tia krimo severe punos, sed al vi, sinjoro, tio ne helpos. Kredu min, kaj ni forlasu tiun ĉi interparolon...

James komencis ekscitiĝi.

Snivin estis trinkanta helan bieron, suspiranta kaj finfine koleriĝis.

— Al diablo vian portseĝon! — diris li. — Al ĉiuj diabloj! Mi konas la lokan popolon ne malpli bone, ol vi. Vi povas ilin ĉiujn pendumi, sed neniu vin portos sur la manoj. Memorfiksu tion por ĉiam...

Nokte la multekosta portseĝo de leŭtenanto sinjoro James pro nekompreneblaj kaŭzoj forbrulis ĝiscindre. Forbrulis nur la portseĝo, kaj nenio krome. Restis nigriĝintaj pro fajro kupraj najloj, feraj bukoj de rimenoj, pordaj hokoj kaj serureto. Ĉion ĉi la soldatoj alportis al leŭtenanto James.

James balancis la kapon.

Ekde tiu tago li ekmalamis Krikov-on. Li estis certa, ke la portseĝon bruligis Krikov. Malobeema brilo de la pupiloj de

Atanazio Petroviĉ furiozigadis la leŭtenanton. Kaj James decidis atendi okazon, por dispremi, rompi, obeigi Krikov-on.

Tia okazo baldaŭ aperis. Inspekti ŝipojn leŭtenanto James ne iradis. La ŝipestroj de longe venadis al li, metadis sur la tablon interkonsentitan kvanton da ormoneroj, kaj ankoraŭ donacon, kaj riverence adiaŭadis.

Kun tamburado soldatoj, gvidataj de kaporalo, leviĝadis laŭ ŝtuparo de fremdlanda ŝipo, la kaporalo parkere faradis tedajn demandojn:

— Ĉu vi ne estas fremdlandaj militistoj?

— *Nein*! — respondadis la fremdlandano.

— Ĉu vi ne havas sur la ŝipo kanonojn, haŭbizojn, kolubropafilojn, arkebuzojn, muskedojn pli, ol necesas por defendo kontraŭ mara pirato?

— *Nein*!

— Ĉu ne estis vi en kontaminitaj lokoj kaj ĉu ne havas vi sur la ŝipo malsanulojn kun infektaj malsanoj, kontraŭ kio nin Dio savu?

— *O, nein*! — sekvadis respondo.

Batadis tamburo. Al la soldatoj kaj la kaporalo oni alportadis po glaseto da brando kaj donadis po dek kopekoj al homo, kaj al la kaporalo aparte — ankoraŭ kvindek kopekojn. Ĉio finiĝadis per reciproka plezuro. La soldatoj iradis en la drinkejon, leŭtenanto James dolĉe tiradis sin sur sia alveturigita el trans la maro lito kun flugantaj Kupidoj, kalkuladis siajn enspezojn de la ŝipoj, atendataj por la nuna foiro...

Sed okazis tiel, ke la kaporalo malsaniĝis, kaj anstataŭ li

estis ordonite iri al Krikov. Leviĝante laŭ la ŝtuparo, Atanazio Petroviĉ pufigis la naztruojn — odoris je zingibro, ne indikita en la listo de transmaraj varoj. Dum pridemando la fremdlanda ŝipisto ĵure depoziciis, ke zingibron en la holdo li ne havas.

— Kaj muskaton?

Ankaŭ muskato, laŭ vortoj de la ŝipestro, sur la ŝipo same ne estis. Tiam Krikov ordonis pririgardi la ŝipon.

La doganistoj en perplekso iris serĉi. Ĉu ili trovis aŭ ne trovis, sed, instruitaj de la kaporalo, diris, ke ne trovis. Krikov trovis mem kaj deklaris al la ŝipestro, sub tambura batado, konfuzon. La holdon li sigelfermis per la propraj manoj.

Vespere James vokis lin al si kaj batis per promenbastono svinge al la kapo, al la vizaĝo, ree al la kapo.

— Vi bruligis mian portseĝon, — diradis li, — vi nun faris al mi damaĝon. Al vi estos tre malbone, tute malbone, prepariĝu al tio...

Laciĝinte bati, li eksidis, demetis la perukon de la kalva kapo, klarigis, ke se eĉ li tute mortigos Krikov-on, tiam al li, fremdlandano, nenio malbona estos pro tio, li diros, ke Atanaĉjo Krikov estis ŝtelisto, kaptita ĉe ŝtelo kaj murdita en ekscito.

— Mi estas ĉi tie ne kiel vi! — prononcis James. — Vi estas kiel ĉiuj, sed mi kiel malmultaj. Mi estas alilandano, jes!

Atanazio Petroviĉ lekis la sekajn lipojn, ŝanceliĝante eliris. Nokte li rakontis pri ĉio okazinta al Silentulo.

— Kaj li murdos! Kio al li estos? — subridis Silentulo. — Ĉu malmultas niaj, tiele pereigitaj? Prefere vi foriru el tiu ĉi

afero...

— Ne, mi ne foriros!

— Nu, do li murdos...

Ankoraŭ post tago Krikov ekiris jam ne anstataŭ la kaporalo, sed kiel soldato, trovis ne indikitan en la listo kariofilon en sakoj kaj mem kriis konfuzon. La kaporalo devis sigelfermi la holdon per vaksa sigelo, foriri sen kutimaj kvindek kopekoj kaj kun seka gorĝo. James ree ordonis al Krikov veni kaj, decidinte, ke hodiaŭ li unue konversacios, kaj poste komencos bati, demandis, kial Atanaĉjo Krikov — polvo, bestoĉasisto, nenio — tiel alte opinias sin, ke eĉ sian kaporalon ne agnoskas kaj malhelpas al tiu perlabori kvindek kopekojn?

Krikov respondis trankvile:

— Ŝmirmonon, sinjoro leŭtenanto, preni estas malpermesite!

Al James pro furiozo ektremis la malsupra makzelo.

— De kiu malpermesite? Ĉu de vi malpermesite? Sed kiu vi estas? Vi, eble, forgesis, ke mi povas vin neniigi tute? Do vi tion rememoros!

Oni trenis lin en la korton — vipi. Lin batis la kaporalo, priverŝadis per akvo por rekonsciigi kaj ree batadis. Atanazio Petroviĉ ne eligis eĉ unu ĝemon. Kiam oni trenis lin en la domon, li diris al la kaporalo per malforta voĉo:

— Malbone vi faras...

La kaporalo en tiu ĉi nokto terure ebriiĝis, frapadis al la pordo de James, kriis:

— Orgojla fiulo! Eliru, ni interbatiĝos!

Post monato Krikov en dana ŝipo ree kriis konfuzon — li trovis ne indikitajn en la listo muskedojn.

— Kion vi pri vi pensas? — vespere de la sama tago per plora voĉo demandis lin la kaporalo. — Ĉu denove vipi vin? Ja el kie vi, turmentanto, aperis por mia kapo?

Krikov silentis.

Al James en la sama tago Krikov diris sentime:

— Ni, sinjoro leŭtenanto, rusaj pomoroj, pordojn en domoj neniam ŝlosas. Se estas almetita bastoneto — do, la mastroj ne estas hejme. Mi pensis: en la ŝtata servo oni devas servi honeste...

James sidis interkruriginte fremdlandan seĝon, rigardis malbone:

— Ĉu vi pensis?

— Mi pensis.

— Do jen, ekde nun vi ne plu pensu!

Matene estis vipado antaŭ soldata vico, sub tambura batado. Leŭtenanto James frapetadis sin per ganto al la femuro, rigardadis al Krikov, mordanta per la dentoj sian pojnon, por ne ĝemi, diradis:

— Batu senkompate, ĝis li krios.

Atanazio Petroviĉ tamen ne kriis. Antaŭvespere, rekonsciiĝinte, li leviĝis de sur la benko, ŝanceliĝante ĝisiris la peronon de la domo, en kiu loĝis James, surĵetis maŝon, enŝovis la kapon, sed deŝiriĝis, — la ŝnuro estis putra. Li trinkis en la korto akvon, frotis la kolon per la polmo kaj ankoraŭ venis en la saman lokon, sed jam kun nova, firma

ŝnuro. Li longe almetadis ĝin en krepusko, sub pluveto, kaj ne vidis, kiel rigardas al li el trans angulo helaj, akcipitraj okuloj de Atanazio, lia samnomulo, ĉefepiskopo, veninta al James por aĉeti Rejnlandan kaj muskatan vinon por sia tablo.

— Kion do vi faras, homo? — demandis la pontifiko. — Ĉu vi deziras vin mem murdi? Memmortigon ĵeti al la ofendinto?

La manoj de Krikov tremis. Apogbastona servoknabo de Atanazio kaj lia servisto kune kun la episkopa koĉero demetis de la doganisto la kanabŝnuron. Krikov samloke sur la perono, per preskaŭ trankvila voĉo diris, ke vivi tiel li ne plu povas, ke leŭtenanto James decidis mortigi lin, ke li prefere pendumos sin antaŭ la pordo de sia ofendinto, ol pereu de li.

La ĉefepiskopo ordoneme batis per sia apogbastono la pordon de la domo de la fremdlanda oficiro. Tiu eliris ne tuj, sed ekvidinte la severan pontifikon, ektimis, komencis riverenci malalte, svingante buklojn de la peruko. La naztruoj de la pontifiko pufiĝis, leŭtenanto James ekvidis antaŭ si ne humilan sanktan patron, sed furiozan, ne regantan sin en kolero — kampulan maljunulon, fortikan, fortegan, muskolan.

— Ĉi tiun Dvinan loĝanton mi prenas al mi, — furioze diris Atanazio. — Kaj vi, putinido, memoru, elfosos mi viajn misuzojn, kaj fiaĵojn, kaj ŝtelojn, venos ankaŭ al vi malbona tempo, latrono transmara!

James ekpenis klarigi sian pravecon, sed Atanazio tiel insultis lin, ke li nur retropaŝis, — li ne sciis, kia insultanto kaj sakranto estas mastro[46] Atanazio en kolero. Krikov-on oni kuŝigis en la episkopan kaleŝon, kaj kiel ili ĝisveturis la

46 Mastro (владыка) — alparolo al ĉefpastro (proksimume «via ĉefepiskopa moŝto») *(trad.)*

episkopan biendomon en Ĥolmogoro, Atanazio Petroviĉ ne memoris. Ĉi tie li estadis en ermitejo, ĉe maljunaj monaĥoj, ĉi tie oni ŝmiradis lin per ursa graso kaj preĝadis pri li. Ĉi tie li rapide resaniĝis kaj tuj ekenuis kun la monaĥoj. Tiam Atanazio sendis por li sian sakristianon.

Kiam Krikov, ĝeniĝante, transpaŝis la sojlon de varmege hejtita ĉambreto, la maljunulo, nudpieda, simila al pomora avo, estis leganta libron — versaĵojn. Lia kampula, kvazaŭ elhakita vizaĝo radiis saĝon kaj ĝojon, en la okuloj brilis larmoj.

— Ĉu vi venis, stultuleto? — kun afekta severeco demandis li kaj ordonis al Krikov sidiĝi kaj aŭskulti. Demandante pri nenio, ŝovinte la grandegajn manojn sub la mallarĝan zoneton de sia simpla hejmfarita ĉemizo, li diris nekutimajn vortojn:

— La vivo homa, nepeto, estas la plej bona donaco de la prapatrino naturo. Kun kio kompari ĝojon legi versojn de Ovidio, Danto, Petrarko? Aŭ kiam vi aŭskultas kanton, ĉu vi povas atenci tion, ke, seniginte sin je la vivo, ĉesi aŭdi, vidi, pensi? Diverse oni povas travivi la vivon. Povas ĝi esti mirakle belega, se por granda celo ĝi tuta forbrulos dum unu horo. Ekzemplojn pri tio vi trovos en vivpriskriboj de famaj viroj. Povas ĝi esti ankaŭ tute sentaŭga, se vanta homo travivos cent jarojn. Povas ĝi esti ankaŭ malutilega, se vivas sur la tero malbonulo.

Kial do, stultuleto, malfeliĉa samnomulo, deziris vi fari pri vi? Por kiu? Pro kio? Atendu, vi ĝisvivos, ke vi mem estos oficiro, kaj se vi estas oficiro — tiam vi havas multe da laboro sur la vojo de via vivo, vi naskiĝis al la mondo ne malforta, vi devas vivi kaj ne kaŝiĝi de la destinita afero. Kaj por kio vi bezonas ofendiĝi al tiu James? Por vi, nepeto, estas Rusujo, kaj

por li, via malamiko fia, estas talero, pli da oro akapari, kaj kun tiu oro forfuĝi. Komprenu vi tion kaj ĉesu angori por ĉiam. Kaj lian arogantecon ni malgrandigos, estos li nun multe pli kvieta, forgesos, kiel rusajn homojn devigi sin per la manoj porti kvazaŭ paganan idolon...

Ili konversaciis longe. Atanazio scipovis ankaŭ aŭskulti. Severe kuntirante la brovojn, li demandadis Krikov-on, kiel kaŝas fremdlandaj ŝipestroj siajn varojn, kiel veturigas maltaŭgan arĝenton, kiel donas koruptaĵojn. Antaŭ nokto la ĉefepiskopo, kvazaŭ rememorinte, ke li estas pontifiko, per grumbla voĉo pentopunis Krikov-on ne tro severe, kaj ordonis post plenumo de la pentopuno iri reen al Arĥangelsko, por plu servi tie en la doganejo.

— Finbatos min tie James! — diris Atanazio Petroviĉ.

— Ĉu vere?

Plenumi la pentopunon en Ĥolmogoro estis tede: preĝi Krikov ne scipovis ĝuste, pri kio li estas peka — ne estis komprenanta, en la preĝejo li oscedadis ĝis larmoj. La popo, fiksita al li, insultadis lin per sakraj vortoj, li responde insultadis per pigra voĉo.

En vesperoj Atanazio Petroviĉ ekfrekventis maljunan eburĉiziston Daniliĉ-on, longe rigardadis, kiel tiu laboras, miradis pri lia arto, suspiradis. Daniliĉ ĉizadis, por sendi en Moskvon por donacoj de la rusa caro, noĉitajn kombilojn kun flugantaj mevoj, skatoletojn kun serpentoj kaj rampuloj, kiujn venkas Sankta Georgo, ĉizadis surmetaĵojn por fustoj kun mirindaj birdoj kaj bonaj gajaj sciuroj...

Al la maljuna Daniliĉ estis agrable, ke Krikov ĝojas pri lia

laboro, estis gaje rigardi, kiel tiu per singardaj fingroj prenas laboraĵon — kombilon aŭ alian faraĵon kaj, metinte sur la polmon, longe admiras. Daniliĉ el sub la vilaj brovoj vidis: tiu knabo komprenas tion, kion neniel povis kompreni kaj la kancelaria kolektisto, kiu venadis por faraĵoj, kaj la kancelariestro. Kaj ĉu estis komprenantaj tiun arton bojaroj, kaj ambasadoroj, kaj fremdlandaj reĝoj?

Hejme, en Arĥangelsko, ĉe Krikov kuŝis bonaj rosmaraj dentegoj. Li skribis tien, — oni sendis, kaj li donacis ilin al la majstro. Daniliĉ instruis Krikov-on, kiel blankigi eburon, kiel eligi el ĝi grason, kiel flavigi per safrano, kiel kuiri vitriolon kun santalo por nielo sur eburo, kiel mordi eburon antaŭ laboro per aluno.

Atanazio Petroviĉ aŭskultadis, memorfiksadis.

Malgranda figureto — flavete laktoblanka — jam vidiĝis al li, li jam sciis, kion li ĉizos, tuj kiam ekscios, kiel necesas fari.

Eksciinte, kiel, li tamen ne sukcesis ĉizi tion, kion li deziris. Malgrandaj ĉiziletoj elglitadis el la mallertaj manoj, fajliletoj faladis sur la plankon, alenoj kaj pikiloj faradis ne tion, kion li atendis de ili...

La daŭro de la pentopuno finiĝis.

Atanazio Petroviĉ revenis al la doganejo kaj kun miro eksciis, ke dum sia foresto li estis promociita al supera dogankontrolisto kun kaporala rango.

La kaporalo, kiu laŭ la ordono de James siatempe senkompate batadis lin en la angla maniero, falis al liaj piedoj, kiam li eniris.

Atanazio Petroviĉ diris severe:

— Mi ne koleras pri vi. Iru for, ne tedu min...

Leŭtenanto James elloĝiĝis el la dogana domo. Nun li estis asistanto de kolonelo Snivin, kaj Snivin estis estranta la tutan militistaron de la vojevodujo.

— Kiu do vin estras? — demandis Krikov.

— Dume ni mem, kaj nun vi! — respondis dogankontrolisto Feoktistov.

Dum tiu somero Atanazio Petroviĉ per siaj «konfuzoj» donis al la fisko naŭcent tri mil rublojn da profito. En Moskvo oni ekmoviĝis, al Krikov venis rekompenco: posteno de estro de la doganejo. Ĝuste en la tago de sanktaj Kosmaso kaj Damiano[47] la tolaĵlavistina filo, bestoĉasisto Atanaĉjo Krikov ricevis rangon de leŭtenanto de dogana gardistaro.

Nun sur fremdlandaj ŝipoj ĉiam pli malofte aŭdiĝadis tamburado kaj la vorto «konfuzo». Negocistoj iĝis multe pli singardaj — famo flugas kiel birdo. Pri la honesta leŭtenanto Krikov oni diradis ĉie — kaj en Dancigo, kaj en Stokholmo, kaj en Kopenhago. Diradis, ke li ne prenas ŝmirmonon, eĉ aŭdi pri ĝi ne deziras. Sed pro tio al Krikov iĝis ne pli, sed malpli bone.

Snivin skribis al Moskvo, ke via trolaŭdata lavistinfilo, plej eble, interkonsentis kun la ŝipistoj, kaj eĉ unu moneron por la fisko ne plu povas elskui.

Ofendita James skribadis al parencoj en la fremdlanda kvartalo Kukujo — eble, tio atingos tiun, kiun necesas.

La fremdlandaj ŝipistoj estis informitaj: faligi Krikov-on deziris kaj Snivin, kaj la estroj de la ŝipoj, komercantaj kun

47 La 1-a de novembro laŭ la Julia kalendaro. *(trad.)*

Rusio.

Kaj Krikov estis sola.

3. Sentimas li troe!

Tuj kiam ili preteris la monaĥejajn butikojn kaj eliris al la Trinitata korto de la Sija monaĥejo de sankta Antonio, kiu estas ĉe la veturebla vojo, ili ekvidis grandan interbatiĝon. En kotona kaftano kun arĝentaj butonoj, disŝirita, hirtigita forta negocisto estis vipanta per la pugnegoj, strebante bati plej lerte, mortige, imponan ŝarĝiston en basta ĉapo, en ĉemizo ĉifonigita, surverŝita per sango. Tiun ŝarĝiston estis tenantaj fremdlandano Ferponten, kiu aĉetadis kadavraĵojn, por kuiri el la mortintaĵo sebon por sapo, kaj ankoraŭ iuj homoj — ĉu de Ferponten, ĉu de la riĉa negocisto. Estis batantaj ĉiuj, ĉiu penis bati pli lerte, al la suna plekso, sub la ripojn, al la ventro. La ŝarĝisto jam preskaŭ ne estis rebatanta, moliĝis, lia kapo skuiĝis. Subite de la batantoj deiĝis unu — rapidpieda, kaj ekkuris laŭ la vojo al la antaŭurbo.

La nazotruoj de Rjabov pufiĝis, li kaptis la kuranton je la ŝultro, demandis:

— Pro kio vi batas?

— Por ke la fetora hundaĉo ne kutimu doni netaŭgan monon.

— Kaj vi mem kien hastas?

— Ja al la arestejo. Ili torturu iom la latronon.

— Haltu! Atendu!

La sendito penis forŝiri sin, Rjabov premis lin desupre, tiu entiris la kapon, en timo ekrigardis al Rjabov: tiaj uloj tuj rompas, ne permesas eĉ preĝi antaŭ la Lasta juĝo. Fremdulo Ferponten, tuta en nigra vesto, turniĝinte, estis rigardanta al la arbitro de la rudristo.

— Oĉjo, oni kaptos nin! — timide petegis Demĉjo. — Ni kuru, oĉjo!

— Tenu ĉi tie la kanajlon! — ordonis Rjabov kaj per balancantaj paŝoj ekiris al la interbatantoj.

Li iris nehaste, tenante la manojn malantaŭ la dorso, elmetinte antaŭen la grandfruntan kapon, kun furioze briletantaj okuloj. Nun por li ĉio estis egala, ĉu ŝiri, ĉu kudri. La ŝarĝiston li rekonis, — tio estis fiŝista orfo Eŭsebjo, kvieta ulo, respektema, diligenta laboranto, afliktita ekde la infanaĝo de la malfeliĉa orfeco. Per siaj ŝarĝistaj mizeraj lukroj Eŭsebjo vivtenadis nemalgrandan familion: neirkapablan avinon, kaj onklinon, kaj ankoraŭ iujn kvietajn, timemajn kiel musidoj, knabinojn-nevinojn. Kion oni faras kun li nun? Pro kia kulpo? Ĉu pro ŝipestro Urquhart, kiu en bareloj alveturigis netaŭgan monon?

Pro la maljusteco, pro amara kolero, pro ofendiĝo la vizaĝo de la rudristo iĝis nerekonebla. Kaj kiam li aliris tre proksime al la negocisto, kiu furiozis super la ŝarĝisto, al la homoj, diligente helpantaj al li, al fremdulo Ferponten, io tia fariĝis en lia tuta aspekto, tiel li ŝajnis terura al la ofendantoj, ke la batado per si mem ĉesis, kaj en la veninta silento ĉiuj ekaŭdis, kiel malfacile spiras Rjabov.

La negocisto en la kotona kaftano viŝis sian ŝvitkovritan vizaĝon. Liaj dungitoj malantaŭiĝis, por ne trafi unuaj sub la

pezan manon de la rudristo. Ferponten malfaldis faldeblan tranĉilon, subridis, — jam ne unuafoje li per tiu ĉi tranĉilo tranĉis moskvianojn, stultulojn; ĉe ofendo tiuj batadis per la pugnoj, sed li respondadis en sia maniero, la tranĉilo estis longa, bone eniradis inter la ripojn, tuj atingante la koron. Sed ĉi-foje ial malfruis Ferponten, ne sukcesis okupi pozicion, falis la vizaĝon malsupren pro terura bato de fiŝista boto al la ventro. Tuj falis ankaŭ la feroca negocisto; ŝrikante, ekrampis for de la batiĝo. La ŝarĝisto, ne plu tenata de iu, sidiĝis sur la teron, pendigis la kapon. Lia konscio, evidente, nebuliĝis. La homoj de la fremdlandano rekonsciiĝis, jetiĝis al la rudristo kun ĉio, kio estis ĉe la mano: unu kaptis ŝtonon — por bati al la verto, alia deŝiris laton de barilo, tria simple saltis sur la ŝultrojn — por faligi kaj strangoli. Ankaŭ Ferponten mem leviĝis. Sed jam estis venantaj de la Komerca korto aliaj ŝarĝistoj kun hokoj, — ili maltrankviliĝis, ke malaperis Eŭseĉjo, komprenis: ĉie en la antaŭurbo oni kriadis «latrono!» pro la falsa mono.

— Hej! — kriis unu per raŭka voĉo, ekvidinte la batiĝon.

— Rapidu, najbaroj! — kriis alia kaj ekkuris per tiaj paŝoj, ke polvo leviĝis foste...

— Eŭseĉjo, tenu vin!

Ferponten ĉirkaŭrigardis, faldis la sekretan tranĉilon. Liaj dungitoj jam estis kurantaj trans la barilon, la hokistoj, atingante, batadis iun al la dorso, iun al la kapo — se batalo, do estu batalo, ili sciu, kiaj estas en kolero Dvinaj ŝarĝistoj. Ankaŭ la negocisto ricevis, kaj pli ol aliaj — ne kriu «latrono!», ne sendu al torturo senkulpulon. Ĉu vi pensas, ke por vi ne estas hoko, ne atingos vin? Sed jen ja, atingis...

— Al la ventro ne batu, pro Dio! — ĝemis la negocisto.

Ili enrompiĝis en la domon de Ferponten — ja tro koleris la popolo kontraŭ la fremduloj, en kolero ili perdis la kapojn, — frakasis kuirilaron, tretis blankvulpajn litkovrilojn, dispecigis vitrajn botelojn. Dum tiu tempo najbara fremdulo sendis homon al la rajdistoj. En malbona krepusko kun foraj fulmoj la rajdistoj per ĉevala linio, levinte la sabrojn, ekiris al la ŝarĝistoj. Rjabov ĉion ĉi jam ne vidis: li forkondukis Eŭsecĵon al avino Eŭdoĥa — por kaŝi en la subplankejo. Eŭsecĵo iris malrapide, rakontis:

— Kiam kvitiĝis kun ni la komercisto, al mi la knaboj donis moneron, ordonis panon aĉeti, kaj kvason, kaj stofon da vino. Ĉion ĉi meti en korbon, kaj la korbon ili same donis. Mi aĉetis ĉion, kio necesis, li — la butika sidanto — komencis doni restan monon. Duonrublon, kaj du dekkopekojn, kaj tri duonkopekojn. Kaj ekintencis li mian arĝentan moneron elprovi, elprovis per la dento, kaj kriis «latrono!». La negocisto alkuris, la dua kun li kaj aliaj ceteraj homoj. Kaj komencis bati min...

Avino Eŭdoĥa sen troaj paroloj kaŝis Eŭsecĵon en la subplankejo, metis al li tien ĉerpilon da akvo, poton da avena orfa kaĉo. Ĵetis severan rigardon al Rjabov:

— El flamo kaj en fajron. Ĵus vi el unu malfeliĉo eliĝis — tuj en la alian ĝis la kapo. Ĉu vi ne laciĝis ankoraŭ?

Rjabov silentis.

— Ĉu oni kaptos vin?

— Povas esti, kaptos. Sed eble mi foriros. Mi, avinjo, estas ruza, pli ruzan viron, ol mi, vi ne trovos.

— Sentimas li troe, — rapide eldiris Demĉjo. — Nu kie, avinjo, oni vidis, ke unu homo sen ajna timo kontraŭ multaj homoj iras. Kaj ĉio al li, avinjo, necesas, ĉio lin koncernas...

— Ĉu mi malbonas por vi, infano? — ridante per la okuloj, demandis Rjabov kaj nedolore tiris la orfon je la molaj, densaj haroj.

Akompanante la rudriston, la maljunulino ordonis:

— Ne interbatiĝu vi tie.

— Kie?

— Ĉu vi mem ne scias? Drinkos vi vinon kaj atencos mian Ataĉjon murdi, kaj li ne permesos...

— Sed por kio ja, avinjo?

— Pri tio vi pli bone ol mi scias...

Rjabov subite intense ruĝiĝis kaj senvorte eliris. Demĉjo, mallevinte la kapon, iris post li.

4. La rudristo kaj la leŭtenanto

Kiam ili venis, la leŭtenanto jam sciis, ke okazis batiĝo sur la vetura vojo, ke multaj ŝarĝistoj estas arestitaj, kaj komencis la tutan aferon rudristo Rjabov Ivano filo de Sabateo.

— Ĉu mi komencis? — demandis Rjabov.

— Kaj ĉu vi la veron deziras? — per demando respondis la leŭtenanto. — Ĉu vi deziras, ke ŝipestro Urquhart estu kulpulo de ĉi afero? Verŝajne, li al la estrantaj homoj per pura oro afablaĵon donis, Snivin ne ordonos lin serĉi.

— Kial do por ili tia libereco ĉe ni estiĝis? — demandis Rjabov.

La leŭtenanto ĵetis al la rudristo rigardon deflanke, subridis kolere.

— Oni diras, ke la caro-patro en Moskvo el la germana kvartalo ne eliras, do tial ili tiom liberiĝis. Tamen vi pri tio ne diru eĉ vorton! Kaj ankaŭ vi, junulo, ĉu vi aŭdas?

— Nenion tian mi, sinjoro, eĉ aŭdis.

Ili longe silentis. Poste Krikov plendis:

— Antaŭ nelonge kolonelo Snivin min preskaŭ batis. Piedfrapadis li la plankon, kraĉadis-insultadis. Vi, diris, estis kaj restas sklavo, kaj nenian komprenon havas, kio estas alta gasto el fora lando. Atendu — la patro-caro venos, torturos vin, tiam vi hurlos, kiel hundo pri mortinto...

— Kaj vi, Atanazio Petroviĉ, lasu sen atento, — konsilis Rjabov. — Ĉiu sian propran aferon sur la tero plenumas, tiun, kiu al li estas destinita: unu la teron plugas kaj en la maro laboras, alia, estro, la ŝtatan trezoron priŝtelas. Malbone ni vivas! Sur la propra tero, sed kvazaŭ en fremda lando. Kiel tio fariĝis, ke angla fremdulo sur nia tero iradas kiel estro?

— Ne ni tion faris! — respondis Krikov.

— Ne ni tion faris, sed oni nin devigas obei la anglan fremdulon. Sed ni ne estas tiaj, ni ne iros tra la malantaŭa perono, kvankam ĝi estas pli oportuna. Ne tiaj ni estas, Atanazio Petroviĉ, homoj Blankmaraj. Ni ne timos, ni ne estas arboj, kaj oni de ni baston por bastoŝuoj ne deŝiros!

Antaŭ la nokto venis fulmotondro, — tiu somero tuta estis riĉa je fulmotondroj, kun fortaj tondroj, kun tranĉantaj bluaj fulmoj, kun rapide kurantaj nigraj nuboj. Pluvo verŝiĝis subite, kiel torento, kontinua, kaj daŭris longe, jen ĉesante por

mallonga tempo, jen denove laŭte tamburante sur tabula tegmento de la dogana domo. Iam ĝi iĝadis tute maldensa, faladis gute, sed poste ree surrompadis nubo, verŝiĝadis torentoj, bruadis tondro, fulmoj flugadis en obskuro, kaj Demĉjo krucosignadis sin kaj mallaŭte alvokadis sanktulojn.

Ili sidis sub tabula alero ĉe la loĝĉambro de Krikov triope — la rudristo, Krikov kaj Demĉjo, interŝanĝante vortojn nelaŭte, aŭskultadis la pluvon, rigardadis la ĉielon. Krikov demandis:

— Kie do vi la velboaton dronigis, rudristo?

— Al la Hundaj ŝtonoj ĝin ondoj ĵetis, sed tio jam ne estis velboato — nur disŝirita lignaĵo...

— Ĉu longe vi ĉiuj suferis?

— Sufiĉe...

Li subridis, rakontis, ke kiam ili komencis droni, remisto Semikov rememoris proverbon, kiel kaptita vulpo diris: «kvankam estas frue, tamen mi devas nokti»...

Krikov balancis la kapon, — jen, popolo, neniam ĝi malgajas!..

La rudristo interrompis, ruze strabante al Demĉjo:

— Metrio nun sopiras, la vestaĵon bedaŭras, kiu dronis en la maro. Ĉion ni havis kiel konvenas — mortotukon kun kapuĉo, mortoĉemizon ĝis la kalkanoj, kronon por la kapo...

— Oĉjo! — timigite ekkriis Demĉjo. — Estas peko blasfemi!

La rudristo ekridis, ŝerce forpuŝis de si Demĉjon.

— Oĉjo, oĉjo, vi ripetas. Estas nenia blasfemo. Mi

demandas — kiel ni nun mortos, kiam ni havas nek mortotukon, nek kapuĉon, nek mortoĉemizon, nek rozarion?

Krikov same ekridis.

— Ni faros! — diris Demĉjo. — Jen ni refortiĝos kaj ankoraŭ faros.

— Ĉu jam duan fojon? Ja fordrinki ĝin estus ne tiom peke. Kie oni tion aŭdis — dufoje mortveston fari? Tio, Metrio, estas peko, kaj tre granda!

Demĉjo ne eltenis, altvoĉe ekridis.

Fulmo proksime flugis sur la ĉielo kaj glitis malsupren, rekte en la fremdlandan Komercan korton. Tie ĝi batis. Tuj en krepusko per mallarĝa lango leviĝis fajro. Baldaŭ oni batis sonorilon, la incendio fortiĝis. Preter la doganejo ekrapidis rajdistoj kun alfiksitaj al la seloj lignaj siteloj, kun hokstangoj kaj hokoj en la manoj.

— Kiam la iliaj brulas, ili tuj veturas, — diris Krikov, — kaj antaŭ nelonge jen ĉe la rivereto Kurjo domoj ekbrulis — neniu hundaĉo ekveturis por savi. Militistoj!

Rjabov leviĝis, reĝustigis sur si la kaftanon, levis la krurumojn de la botoj.

— Ĉu vi intencas iri ien? — per subite malleviĝinta voĉo demandis la leŭtenanto.

— Mi iros pro malgrandaj aferoj, Atanazio Petroviĉ! La nokto estas ne hela, la rajdistoj estas en la incendio.

Krikov same leviĝis.

— Mi sola iros! — diris Rjabov. — La ostoj ekdoloris, dum mi kuŝis ligita. Kaj ankaŭ vi kun mi ne iru, Metrio, satdormu

bone...

La leŭtenanto akompanis Rjabov-on ĝis la palisaro, ordonis al la gardostaranto enlasi lin, kiam ajn li venos. Poste diris al Rjabov kvazaŭ pretere:

— Atentu, rudristo, ke Antipo ne faru ion... Malutilema viro li estas, insidema.

Rjabov silentis; en krepusko, sub malrapida pluvo, lia vizaĝo ŝajnis malgaja.

— Mi al li tro plaĉas, — daŭrigis Krikov, — riĉiĝis li, gadmanĝanto, la monujo plenas de oro, nun mi iĝis taŭga: iel-tiel leŭtenanto. Sed vi kiu estas? Kiu vi estas, por edziĝi al Taisja de Antipo? Ŝi estas la sola ĉe li...

La rudristo suspiris, viŝis la malsekan pro pluvo vizaĝon per la polmo. La pluvo densiĝis, ekfluis kun strioj, la gardostaranta soldato ĵetiĝis en la budon. La flamo en la Komerca korto estis brulanta ĉiam pli forte. Nun ĝiaj rebriloj ludis sur la malgaja, kruda pro vento vizaĝo de la leŭtenanto.

— En la tago de Jonaho la Evangeliisto[48] vi pri kio kun ŝi parolis? — demandis la leŭtenanto.

— Pri la samo...

— Ĉu vi sen la beno geedziĝos?

Rjabov ne respondis.

— Do bone! — kvazaŭ superregante sin, eldiris Krikov. — Por frenezulo eĉ maro estas flako, faru, kiel vi mem scias.

Li turniĝis kaj, larĝe paŝante sub pluvo, malaperis trans la palisaro.

48 La 8-an de majo laŭ la Julia kalendaro. *(trad.)*

— Atanazio Petroviĉ! — vokis lin Rjabov.

Sed la leŭtenanto ne respondis, kaj la rudristo, elektante pli malhelajn stratetojn, ekiris al sia domo, konstruita ankoraŭ de la avo. Por kio li ekiris — li ne sciis mem, simple lin ekportis la piedoj por adiaŭi antaŭ nekonata estonteco, saluti post kiam li eliĝis el morto, kaj eble, ankaŭ la fingroringon preni, kiu kuŝis en sekreta loko, en la subplanka tenejo...

5. Dronis la hakilo

En antaŭlonga somero pluvan sabatan vesperon rudristo Rjabov venis pro enuo al la antaŭurbo Muskoj, serĉante, kie li pli gaje, pli brue diboĉu...

Apud alta kontinua palisaro, trans kiu estis bojantaj ĉenhundoj, staris, kvazaŭ ne rimarkante pluvon kaj venton, nekonata junulino. Ŝiaj haroj estis neligitaj, la maldikaj manoj estis kunmetitaj sur la alta brusto, la rigardo estis meditema kaj severa.

La rudristo ekparolis kun ŝi, kiel alparolas dvinanoj al virinoj, demandis raŭkete, necerte:

— Ĉu bonas via sano je ĉiuj kvar ventoj?

Ŝi ĵetis al li rigardon, plenan de malrespekto, ne respondis eĉ per unu vorto; balancante sian maldikan trunkon, foriris en la bienon; estis aŭdeble, kiel kun knaro eniris en la foldon la ligna riglilo de la barilpordo. La hundoj ankoraŭ longe bojis, sentante fremdulon — la rudristo foriris ne tuj. Kaj ekde tiu momento ŝia imago persekutadis Rjabov-on obsede kaj sur la bordo, kaj en la maro, kaj dum ĉasado, kaj en drinkeja haladzo;

kaj eĉ en preĝejo, kiam li penis preĝi, vidadis li la implikitajn, malsekajn pro pluvo harojn, la kvazaŭ flugantan rigardon, la manojn, maldikajn ĉe la radiko, la balanciĝantan trunkon.

Kaŝe, singarde, avide li komencis eksciadi pri ŝi, kiu ŝi estas. Li eksciis ĉion — tio estas filino de rudristo Antipo Timotejev, nomiĝas Taisja, fieras supermezure, ĉiajn fianĉojn forpelas kun malestimo kaj ilin mokas, en la preĝejon venas malofte, lerta manfaristino, la sola mastrino en la domo. La patro estis iam bona rudristo, sed ektimis la maron, nun komercas sur la bordo, akumulis poton da oro, dungas fiŝistojn, anstataŭ si sendas ilin en la maron kun sia ilaro, okazas, ke superrigardi la dungitaron iras ankaŭ Taisja Antipovna...

Eksciis li ankoraŭ, ke ŝi amas senmezure birdojn kaj ke ĉie en la ĉambroj ĉe ŝi pendas kaĝoj.

Somere, kiam venis fremdlandaj ŝipoj, Rjabov anstataŭ mono postulis flavan, kun frambkoloraj makuloj, birdon. La ŝipestro ĵetis al la rudristo nekomprenantan rigardon, sed la birdon donis. Rjabov prenis la mirindan, laŭtan, persiste kriantan estaĵon en la manojn kaj oĥis. La damnita birdo tiel enpikis la bekon en la polmon, ke li apenaŭ sukcesis deŝiri ĝin. Kaj en boateto, dum li iris trans Dvinon, kaj en la urbo Arĥanĝela, kaj dum li iris al Muskoj al la novkonstruita domo de Timotejev, — la birdo turmentadis liajn manojn. Unue li toleris, poste ekkuris. Estis krepusko, pluvo. Ne petinte permeson, Rjabov enkuris en la fremdan domon, kie brulis kandelo, diris, anhelante pro la kurado:

— Kaĝon donu! Ĝi elronĝis min, aĉaĵo!

Taisja per sovaĝaj okuloj ekrigardis al la hirta, malsekiĝinta sub pluvo viro, al liaj manoj, de kiuj estis gutanta densa,

kvazaŭ nigra sango, alportis kaĝon. Poste mallaŭte diris:

— Tro saĝa vi estas. Kiu do en la manoj ĝin portas, tiun beston?

La manoj doloris, Rjabov ekrigardis al la junulino, al ŝia maldika trunko; en silento estis aŭdeble, kiel sur la puran skraplavitan plankon gutas sango. Taisja same ekrigardis al li, ekridis, kondukis laviĝi, ŝmiris la polmojn per ŝmiraĵo, vindis per puraj ĉifonoj. La rudristo staris kiel statuo.

— Kial vi fostas? — demandis ŝi. — Iru nun.

— Sed kien mi iru?

— Kien vi ĉiuj iras? En la drinkejon! Vinon drinkegi!

Li ekiris, sed ŝi postdiris lin.

— Tro timema. Kiu vi mem estas? De kie vi falis?

— Rudristo, — mallaŭte respondis li. — Nu, fiŝisto...

— Ĉi tie, probable, ĉiuj estas fiŝistoj. Kiel vi nomiĝas?

— Ivano.

— Ĉu Rjabov?

— Rjabov, — humile konfirmis li.

— Ĉu estis vi, kiu en la pasinta jaro trezoron trovis sur ŝipo?

— Okazis! — respondis li.

Pro tio, ke ŝi ekparolis pri la trezoro, al li kvazaŭ faciliĝis la animo. «Ĉiuj ili estas idinoj de Eva! — rezonis li. — Ĉiuj oron, kaj perlojn, kaj rubenojn deziras. Do, estos por vi donaco. Vi mem petis». En la sama vespero li iris al avinjo Eŭdoĥa kaj diris, ke li bezonas iomete el tio, kion li alportis iam, por donaco.

— Por kia donaco?

Rjabov ne respondis.

— Kial do vi silentas, etulo?

La rudristo suspiris kaj nenion respondis. Mensogi li ne ŝatis, sed la veron diri li ne deziris. La avinjo facile frapis lian frunton per sia seka polmo, diris kun minaco:

— Malbonaĵon vi elpensis, rudristo! Mi ja scias, kion mi diras!

— Lasu tion... — morne respondis li. — Ne infano mi estas!

La avinjo alportis kaŝitan, enfositan en la legomĝardeno duonon de la trezoro kaj, ĵetante mokajn rigardojn al la rudristo, akompanis lin ĝis la pordo. Dum kvar tagoj la rudristo venadis al la preĝejo, finfine li renkontis Taisja-n.

Perloj, fingroringoj, kolĉenoj estis en ĉifono, li senvorte malvolvis la pakaĵon, baris per si la leviĝantan padon, diris preskaŭ flustre:

— Jen ĉi, alportis mi donacon... kion vi antaŭe diris... la trezoron ŝipan...

Taisja forpuŝis lin per la maldika mano, ŝiaj vangoj ekbrulis, la okuloj tuj pleniĝis per indignaj larmoj. Kvazaŭ eta infano, li iris post ŝi, entirante la kapon en la ŝultrojn, balbutadis stultaĵojn:

— Tainjo, kara, kial vi... vi ja mem tiam... por kio, birdeto...

Ŝi iris, ĉiam plirapidigante paŝojn, ŝiaj silkoj siblis sub vento, la fiera malgranda kapo estis alte levita, kaj nur indignaj larmoj unu post alia faladis sur la bruston...

Li postiĝis, haltis, anhelante, ne sciante, kion fari, en plena malespero.

El post betuloj, solida, severa — ŝi ĉiam el la preĝejo venadis severa, — aperis avinjo Eŭdoĥa, pririgardis de la piedoj ĝis la kapo sian rudriston, demandis:

— Ĉu donacis donacon?

Li deziris respondi pli krude, sed ne trovis, kion diri, nur en lia gorĝo io pepis. La avinjo karesis lian potencan ŝultron, subite ekkompatis, reprenis por orfoj la pakaĵon kaj kondukis en sian domon por konversacio. Ili eksidis unu kontraŭ la alia, Rjabov tute velka, kvazaŭ malpli alta, la avinjo trankvila, severa, klara.

— Kiel vi pri ni, virinoj, pensas? — demandis ŝi nelaŭte, sed tiel, ke la rudristo teruriĝis. — Ĉu vi malbone pensas, Ivano Sabateiĉ?

Rjabov ne respondis, koncentrante siajn pensojn. En angulo, kverelante kun la lama koko, eksnufis la maljuna erinaco, frapis per la piedoj la leporo. La avinjo kriis al ili, ili kvietiĝis.

— Donacon alportis, stultuleto, — jam ne severe, kun kompato en la voĉo diris Eŭdoĥa. — Pridonacis la knabinon, ĉu?

Li silentis, hontoplena, tute malseka pro subite aperinta ŝvito.

— Nun vi irados! — diris la maljunulino. — Nun vi trivos botojn, ŝin sekvante. Ĝis ŝi pardonos, ĝis vi ĉion ree komencos...

— Ĉu ŝi rigardos min? — demandis la rudristo.

La maljunulino ekridis, eĉ larmon viŝis per tuko.

— Ho, Ivaĉjo, Ivaĉjo... ĉu rigardos... Eble, rigardos... sed kiam?..

— Ĉu ne baldaŭ?

— Sed ĉu por vi urĝas?

La maljuna koko surflugis la tablon, ekrigardis al Rjabov per unu okulo kun moko. La rudristo forturniĝis de la koko, suspiris, viŝis la ŝviton per avinja brodita viŝtuko, kun fervoro aŭskultis la avinjajn vortojn:

— Per rubenoj kaj perloj vi allogas, stultulo, sed poste la harligon sur la pugnon volvos kaj turmentos? Nun sidas tia plumpulo, se rigardi — vere pli kvieta ol ŝafido, sed tiu ŝafido en si tiel pensas: nur, pensas, popo nin edzinigos, tiam mi al ŝi repagos. Kaj suferas poste la malfeliĉulino dum la tuta vivo kun tia turmentanto, — ĉu mi malmulte da ili disde viaj fratoj, bestosimilaj drinkuloj, forprenis? Vi aŭskultu min, Ivaĉjo, aŭskultu: Taisja de Antipo — tian vi eĉ se duonmondon ĉirkaŭrajdos, ne trovos, eĉ ŝian ungon vi ne valoras, eĉ sub ŝiajn piedojn kuŝiĝi estas por vi tro granda honoro, pripensu — kielos al ŝi esti via edzino? Kio vi estas? Nu, rudristo bona, amiko honesta, naskiĝis ne timema. Sed kio ankoraŭ? Por ŝi vi vian fieron forgesu, — ŝi, Ivaĉjo, estas pomorino, por ŝi la maro ne estas mirinda, kaj, mi pensas, ŝi mem ne estas timema...

— Ĉu pri fiero nun temas, avinjo, — diris Rjabov. — Pri la vivo nun temas...

La maljunulino kun subrido ĵetis al li rigardon, movis la ŝultron, balancis la kapon.

— Videblas, ke tio vere vin tuŝas, infano. Nu, donu Dio. La kapon vi antaŭ ŝi pli malalte klinu, pli malalte... Kiam fraŭlino vidu feliĉon, se ne nun...

Ŝi ne findiris, sed tia fajro subite ekbrilis kaj estingiĝis en maljunaj ŝiaj senkoloriĝintaj okuloj, ke la animo de la rudristo tuj faciliĝis. «Multon vidis la avinjo dum sia vivo, — pensis li, elirante el ŝia kaduka domo, — vidis, kaj mem scias, kion mi sentas... Stultaĵon ŝi ne konsilus...»

Dufoje li penis dungiĝi kiel rudristo al Timotejev, konsentis al ajna pago, sed ne prenis lin Antipo; en la tria fojo li prenis lin kiel remiston, — ja tre flate estis por Antipo: la unua en tiuj ĉi lokoj rudristo prenis kiel honoron dungiĝi al li. Tiutempe Antipon mem atakis pikdoloro, por kies kuraco necesis akiri rorantan gobiuson, elpreni el la akvo lerte, tiel, ke la fiŝo eligu sian sorĉan roradon. Rjabov elprenis gobiuson, ĉiuj ĉirkaŭe aŭdis, kiel roris ĝi trifoje, poste li ĝin sekigis, metis sub la sternaĵon de Antipo. Dum li estis en la domo, Taisja eĉ ne ĵetis al li rigardon; kiam li eliris, ŝi atingis lin en la korto kaj, rigardante en la okulojn, diris, kiel ŝajnis al li, kun malamo:

— Lasu min, ĉu vi aŭdas? Tutegale mi ne iros en la maron, se vi iros! Mi ne iros kun vi!

— Tamen vi iros! — respondis Rjabov kaj per feraj manoj prenis ŝiajn ŝultrojn. — Iros vi, kara, ĉie kun mi iros, eĉ se ni mortos, eĉ tiam kune, ne forlasos mi vin...

La tago estis malvarma, ankoraŭ ne degelis neĝoj, ankoraŭ ne rompiĝis glacio sur Dvino. Ili ambaŭ estis malvarmiĝantaj sub vento, kaj en tiu horo komprenis Taisja: ne tia homo estas Rjabov, ke eblu peli lin for, kiel forpeladis ŝi ĉiujn ĝis la nuna mateno.

— Kiel remisto dungiĝis! — diris ŝi malmilde. — La unua rudristo sin tenas ĉe knabina basko, ne deŝireblas. Ne iros vi kiel remisto! Prefere vi dungiĝus kiel ĥaradrio...

Sed li iris kiel remisto, iris ankaŭ ŝi por la tuta longa somera marlaboro. Unu virino inter la fiŝistoj, ŝi estis kun ili kiel viro, respondadis bruske al ĉiu vorto, manĝadis samon, kion manĝis ĉiuj, dormadis sur ŝtonoj, kiel dormadis la aliaj. Same kiel ĉiuj fiŝistoj, ŝi dum du, dum tri tagnoktoj ne fermadis la okulojn, ja kiel eblas dormi, kiam forte iras en la retojn fiŝo kaj ili elretigas ĝin kvinfoje dum tago. Sub la nesubiranta suno la fiŝistoj diskarnigadis gadon. La laboro de Taisja estis elekti por graso hepaton, ŝiaj manoj nigriĝis, la haŭto jukis. En noktoj trans granda ŝtono ŝi ploradis, kiel etulino. Rjabov venadis trans la ŝtonon, ŝi ĵetadis al li ŝotron:

— Iru for, ne trudiĝu!

Dum dekdusemajna sekiĝado de la fiŝo, dum saligado de gado en kavoj, dum fandado de graso Rjabov ne rimarkadis tempon. Ĉio ruliĝis kvazaŭ unu tago — ĉu ĵetis Taisja rigardon aŭ ne ĵetis, ĉu forturniĝis aŭ diris vorton, ĉu ekkantis aŭ eliris kolera, — ĉio estis: kaj ĝojo, kaj malĝojo, kaj feliĉo, kaj malfeliĉo, — ĉio kvazaŭ en unu tago. Kaj kiam ili revenis — jen tiam iĝis malfacile. Kiel ne vidi ŝin? Kiel ne aŭdi ŝin? Kiel ne paroli kun ŝi?

Nelonge antaŭ la Asumpcia foiro — fiŝa — li, kaj Taisja, kaj ankoraŭ remisto Simĉjo, kaj ses tributuloj iris al fiŝkaptado. Nun li iris jam ne kiel remisto, sed kiel rudristo, la ŝipo estis sufiĉe bona.

Sur la vojo subite batis skualo de tia forto, ke la pobo de la barko leviĝis. Rjabov, alpreminte al si Taisja-n, por ke ŝin ne

forprenu akvo, ĵetis en la velon hakilon — la klingon antaŭen. La velo krevis, la skuala vento disŝiris ĝin duone, la barko ekstaris sur la ondon glate.

— Malhisu la velon! — kriis Rjabov.

La ŝipo ekiris kviete, Simĉjo estis preparanta kudrilon por kudri la truon, trabatitan de la hakilo.

La ĉielo estis heliĝanta, la skualo foriris malproksimen, ĝi polvis nun ĉe la norvegoj. La rudristo serĉis per la okuloj, balancis la kapon:

— La hakilon mi malbone ĵetis, dronis nun la hakilo. Ĉu vi skoldos min, mastrino?

— Amata mia, kara... — aŭdis li.

Tio estis ŝia voĉo, sed li ne kredis, ja kiel li povis kredi! Li turniĝis, rigardis: Taisja estis staranta, forturniĝinte de li, rigardis al la maro, al ŝaŭmaj surfoj, kurantaj sur ondoj, ŝi estis sama, kia estis antaŭe. Ĉu lia konscio malklariĝis?

Ili venis al la loko, ŝarĝis la barkon per bareloj, salitan fiŝon ili metadis tavole en la ŝipon, sekigitan fiŝon faligadis ie ajn. Sub peza barelo rompiĝis stango, la barelo ekkuris malantaŭen, batis Rjabov-on al la brusto, li falis sur la dorson, leviĝis, sed ne povis iri. Kaj tiam li denove aŭdis:

— Amata mia...

Ne serĉante, de kie, de kiu estis dirite, li fermis la okulojn kaj pensis: «diru ankoraŭ!»

Neniu diris ion plu. Forkraĉinte sangon, li kuŝis ĝis la vespera suno, leviĝis, ekiris kaj trans ŝtono trovis Taisja-n. Ŝia tuta vizaĝo estis malseka pro larmoj, la okuloj rigardis strange,

tian rigardon li ankoraŭ ne vidis: ĉu timigite rigardis ŝi, ĉu ne rekonis lin.

— Kio estas al vi? — demandis li.

Ŝi silentis. Malforte, per feblaj brakoj, li garde brakumis ŝin kaj demandis:

— Ĉu ne amas vi min?

— Amas! — per laŭta kaj klara voĉo respondis ŝi. — Amas! Ekde tiu tago, kiam vi al la patro la gobiuson alportis, — amas! Nur en vi estas lumo por mi. Vin solan mi amas, kaj neniun mi bezonas, kaj nenion mi bezonas...

Ferminte la okulojn, ridetante, ŝi mokimitis:

— La hakilo dronis... Ĉu vi skoldos min, mastrino?

Kaj ekridis, klininte la kapon malantaŭen, per ĉarma, apenaŭ aŭdebla rido.

— Nenion mi bezonas, — diris ŝi poste, nokte, kiam li staris sur la pobo kaj vento fajfis en veloj, — nenion, ĉu aŭdas vi, urseto? Se la patro ne benos, tutegale vin min forprenos, vi estas rudristo, mi ne estas bojarino, ni nutros nin. Sed ĉu vi aŭdas min, Ivano Sabateiĉ?

Li aŭdis kaj ne aŭdis, estis komprenanta kaj ne komprenanta.

Ĉapitro kvina

Ne kun riĉul' mi vivos — kun la mondo!

Kanto

Jen nia bela princino:
Estas nek patro, nek patrino,
Ne estas kiu ŝin vestos,
Ne estas kiu ŝin benos...

Kanto

1. Malfacila konversacio

En dimanĉa mateno Antipo Timotejev frapegis per la pugno al la tabloplato tiel, ke ektremis fajretoj en lucernoj, graŭlis furioze:

— Kioman fojon dirite — mi ŝin ne fordonos! Mizerulo, fava hundaĉo, nelavita muzelo, kion vi elpensis!

— Malpli laŭte bruu, patro, — morne petis Rjabov.

— Mi por vi ne estas patro, vi por mi ne estas bofilo! — kriegis Antipo. — Ajna remisto trudiĝas kiel parenco! Iru, kampulaĉo, for, dum vi estas viva, iru, hastu...

Sur pato estis siblantaj flanoj kun kazeo, kantis birdoj de Taisja en siaj kaĝoj, plu hele lumis la suno, ĉio estis kiel en la pasintaj tempoj, sed efektive ĉio iĝis malbona, tiel malbona, ke nur pereu...

Senhaste, peze frapante per la botoj, Rjabov eliris sur la peronon. Taisja estis atendanta ĉi tie — apud la sorpujo. La

rudristo silentis.

— Nu? — demandis ŝi.

— Malbone! — eldiris li.

— Ĉu pli malbone ne okazas? — tirinte la brovon, subridis ŝi. — Do, ĉu kompati vin, rudristo? Jen, kia malfeliĉo, jen katastrofo neeltenebla, pli malbona ne troveblas en la mondo...

Rjabov rigardis, ne komprenante — ĉu ŝi ŝercas aŭ vere kompatas lin. Por kio do tiel tremas ŝia broveto, por kio ruze brilas la okuloj?

— Timiĝis vi, mi vidas, al vi mem ne similas, — evidente, terura estas mia patro? Ve al mi, rudristo, eraris mi: antaŭe pensis — mi havas kuraĝan fiŝiston, mi kuraĝan viron al mi prenas, sed li estas milda, kvieta, kiel akvo kaj herbo, timema, kiel leporo aŭ muso...

Sentime, apud la perono, ŝi metis siajn maldikajn manojn trans liajn ŝultrojn, ordonis severe:

— Vi min ŝtele forprenos!

— Kiel — ŝtele?

— Kiel? Ja kiel sukcesos. Forprenos, kaj en tio estas nia sorto. Kian sorton ni havos, tiel ni vivos. Ĉu komprenis vi, saĝulo?

Kun tio ŝi malaperis en la domo.

Poste ĉio iris ĉiam pli malbone. La maljunulo, kvazaŭ freneziĝinte, la dungan laboron pagis per sola gado, li devis reveni en la monaĥejon, en la monaĥejo dronis velboato, patro ekonomo vendis la rudriston al «Ora nubo», kaj tiam en iu aŭtuna vespero leŭtenanto Krikov venis al Antipo por aĉeti

fiŝon por la doganaj soldatoj. Taisja estis en la domo. Atanazio Petroviĉ ĵetis al ŝi rigardon kaj konsterniĝis. Konsterniĝis por longe, la fiŝon aĉetis altpreze, malbonodoran, salitan, pagis ĝin ne laŭ la regulo — ĉion plene antaŭ transportado — kaj soldaton sendis rajdi sur ĉevalo por dolĉaj regaloj. Taisja al la leŭtenanto ne rigardis, sed la maljunulo ekrevis kaj dum la tuta nokto ne povis ekdormi.

Krikov ekfrekventis Muskojn, sidadis silente aŭ diradis tiele:

— Foje kaŝis danaj ŝipistoj klingojn por vendo. Mi kaptis.

Taisja frapetadis per puntobobenoj, ne levante rigardon, la maljunulo flate ekkriadis:

— Interesa afero! Kio okazas!

Denove por longe estiĝadis silento en la ĉambro. Ekkriadis grilo, eksilentadis. Movetiĝadis birdo, kaj nur la puntobobenoj frapetadis en la lertaj Taisjaj fingroj.

La konsterniĝinta leŭtenanto ree diradis:

— Soldato Jerofejev en nevola maniero glutis antaŭ nelonge ĉe ni en la dogana domo kudrilon!

— Jen kiel! Ĉu li mortis?

— Vivas. Kaj tiuj danaj ŝipistoj ankaŭ pipron alveturigis. Ni same kaptis.

Pri la leŭtenanto la maljunulo Timotejev esprimiĝis tiel:

— Pretas sinjoro leŭtenanto Krikov. Nun li de ni ne foriros. Ni havas nian riĉon.

Taisja leviĝis de sur la benko, aliris al la patro proksime kaj

diris:

— Ne estos tio!

Ŝiaj okuloj ekbrulis, la ruĝo foriris de la vangoj. Antipo rigardis al la filino unue kun mirego, poste komencis krii. Ŝi staris forturniĝinte, ne aŭskultis, kvazaŭ ne al ŝi li estis krianta, kvazaŭ ŝin tute ne interesas tuta tiu krio en la domo.

Antaŭ vespero denove alrajdis la leŭtenanto, vestita speciale, surŝprucigita per tinkturo de fremdlanda arbo vanilo, diskombita je tri flankoj, kun spado, kun gantoj, kun spronoj. Timideco tiutage lin atakis tia, ke krom pri la antaŭnelonga pluvo li ne diris eĉ unu vorton kaj nur tusetadis per trumpeta voĉo. Taisja sidis pala, al la gasto ne ĵetis eĉ unu rigardon, la maljunulo koleriĝadis pli kun ĉiu minuto. Kiam la patron oni vokis for el la ĉambro, Taisja diris al la leŭtenanto, ne levante la okulojn:

— Je Dio mi petas vin, sinjoro, ne plu veni ĉi tien. Mi havas fianĉon, de li mi nenien iros, kaj se oni devigos — mi dronigos min.

Ŝi levis al li siajn grandegajn diafanajn okulojn, ruĝiĝis tuta tiel, ke eĉ ŝiaj malgrandaj oreloj iĝis puncaj, ridetis kaj ree kliniĝis super la laboraĵo, mallaŭte eldirinte:

— Pardonu pri tio!

Atanazio Petroviĉ griziĝis, tusis tiel, ke la domo redonis al li eĥon, deziris tuj iri for, sed pensis tion maldeca kaj ne moviĝis de la loko. Necesis ion diri, li kunmetis en la menso frazon kaj diris ĝin per obtuza voĉo:

— Jen kia estas konkludo de ĉi konverso.

Taisja, ne komprenante, ree ĵetis al li rigardon. Li konfuziĝis, diris malespere:

— Tainjo, Taisja Antipovna, kion vi faris kun mi!

Kaj, kunpreminte la kapon per la polmoj, oĥis tiel, ke al Taisja premiĝis la koro. Kaj Krikov tiutempe, hirtiginte sian tritufan hararanĝon, kaptis sian kolumon, malbutoniĝis kaj subite iĝis la antaŭa Ataĉjo, ĉasisto, dvinano, simplulo. La maljunulo sub la fenestroj plu estis skoldanta dungitojn, promesadis al ili ĉiajn plagojn, kaj ĉi tie, en la ĉambro, Taisja unuafoje dum tuta tiu ĉi tempo ekparolis kun Krikov, kiel kun bona kaj sola amiko.

— Atanazio Petroviĉ, sinjoro Krikov! Vi por li ne estas malamiko, vi por li estas amiko! — estis diranta ŝi rapide, kaj ŝiaj lipoj tremis pro emocio. — Mi scias, li rakontis, avinjo Eŭdoĥa vin kiel knabojn en unu kuvo lavadis. Atanazio Petroviĉ, vi por li kaj por mi estas sola amiko en la mondo. Vi alie ne povas, krom helpi al ni, ĉar ni neniun krome havas en la mondo...

Ŝi parolis longe kaj petadis ne rakonti al la patro pri tiu ĉi konversacio, kaj la leŭtenanto sidis apoginte la kapon sur la mano kaj silentis. Poste li same en silento leviĝis kaj, forgesinte sur la benko la gantojn, batiĝinte je la pordofosto, eliris.

En la sama vespero sur la boata albordiĝejo Atanazio Petroviĉ, jam drinkinta sufiĉe multan kvanton da gdanska vodko, renkontiĝis kun la rudristo. Rjabov estis ĵetanta supren sakojn el malnovaj retoj kun seka fiŝo. Krikov rigardis al li desupre, pufigadis la naztruojn, pensis: «Mortpikos mi la ofendinton per la spado, nenio alia restas al mi, tia estos la fino

de ĉi malgaja fablo».

Tamen li ne mortpikis, sed nur diris:

— Mi havas honoron inviti vin, Ivano Sabateiĉ, por kune pasigi ioman tempon ĉe kruĉo kaj konversacio.

— Jen mi la fiŝon elĵetos, tiam vi min invitos! — bonanime respondis Rjabov.

Li elĵetis ĉiujn sakojn, lavis sin en la kvieta Dvino, poste ekrigardis al Krikov kaj demandis:

— Kial vi, Atanazio, hodiaŭ kvazaŭ muŝon glutis? Ĉu vi malsanas?

Ili sidis en la ĉambro de la leŭtenanto, drinkis mumon — anglan bieron. Krikov akre rigardadis al la rudristo, la okuloj de Atanazio Petroviĉ estis malbonkoraj, la supra lipo tremeradis.

— Ĉu mi mortpiku vin? — demandis li.

— Ja mortpiku! — respondis senzorge Rjabov. — Ĉu gravas? Aŭ mortpafu! Prenu vian muskedon, metu sur la stangon kaj pafu. Kaj mi ne moviĝos, la afero estas senerara, vi trafos!

Tiel ili sidis, ĝis Rjabov komprenis, en kio estas la afero. Kaj kiam li komprenis, diris:

— Bone, Atanazio Petroviĉ, kial ni nur ĉirkaŭe iras, pri la afero ne parolas. Mi ŝin vivan ne fordonos. Kaj mia vorto estas sankta. Serĉu por vi alian edzinon, jen al vi tuta mia parolo. Se vi serĉos — trovos, se ne trovos — restos sena, sed Muskojn forgesu viziti.

Krikov sidis silente, peza pro la vodko kaj la biero;

nekutima al alkoholo, li tute moliĝis, kvazaŭ eĉ maljuniĝis. Al la rudristaj vortoj li nur movis la okulojn, diris malgaje:

— Amas mi ŝin, rudristo, tiel amas...

Rjabov silentis.

Peze spirante — la nokto estis sufoka, varma, ne aŭtuna, — Krikov ordonis al la rudristo foriri. Per tio ĉio finiĝis. Krikov ne plu iradis al Muskoj, sed al Rjabov pro tio ne iĝis pli bone. Antipo tute freneziĝis, dufoje batis Taisja-n, en la tria fojo ŝi levis kontraŭ li pastorulon, kaj tiel, ke ŝi batus, se la patro ne elturniĝus ĝustatempe. Por persvado estis vokita popo de sia paroĥo, post li preposto, poste abatino. Taisja al ĉiuj iliaj bonaj vortoj silentis, kvazaŭ mutiĝis. Foje nokte, elkurinte al la rudristo, ŝi elportis du ringojn, diris: jen ni gefianĉiĝos, tiel ne taŭgas, sed ni faros...

La ringon li ne portis, tenis hejme en la subplankejo, por ne malhonori la fraŭlinon. Li timis — lin mem oni enigos en la monaĥejan malliberejon, aŭ li dronos, aŭ oni vendos lin trans la maron, kion ŝi tiam faru, kiel vivu plu? Sed kiam li pensis, ke ŝi edziniĝos al aliulo, la sango ĵetiĝadis al la kapo, ajna prudento forlasadis la rudriston, en furiozo li turnadis la kapon, balbutadis:

— Ne, vi ne edziniĝos! Ne edziniĝos, kara! Ne edziniĝos!

Hodiaŭ nokte lin kaptis malespero, senekzempla, neniam okazinta antaŭe. Malleviĝinte en la subplankejon, li elprenis la ĉifonon kun la ringo, surmetis la ringon sur la fingron, decidis firme: «Mi fordonos. Kien ŝi kun mi iru? Kion vi elpensis, stultulo, akvoglutanto, al kiu vi rigardas? Sciu, fulgomanĝanto, vian lokon sur la tero, kiu estis destinita al vi dekomence.

Memoru vian sorton, ne serĉu alian, ne evitu ĝin. Maro, kaj tempesta hurlo, kaj kanto en drinkejo — tiel vi plu vivu. Se vi ekamis Taisja-n — foriru. Kion, krom malfeliĉo, vi povas alporti al ŝi? Kia caro? Al kia caro vi necesas? Kiaj povas esti maraj amuzoj? Nenio tia povas esti kaj estos neniam. Prenu vian orfon kaj dungiĝu al malproksima Terska bordo, ja ne tiom longbrakaj estas la monaĥoj — ne atingos tie. De la Terska bordo vi atingos Kolan. Ankaŭ tie homoj loĝas, kaj mortos vi tutegale en la maro. Ne mortas fiŝistoj en domo, ne fosas fiŝistoj tombon en la flava ĉedvina tero. Do kial ne foriri?»

...Kuntirinte la brovojn, apoginte la barbon sur la pugnojn, longe kaj senmove sidis li en la gepatra domo, aŭskultadis, kiel sub la planko susuras muso.

Malleviĝis sur la genuojn meze de la ĉambro, diris mallaŭte:

— Benu, patro, benu, patrino, iri el la urbo Arĥanĝela for. Ne estas ĉi tie por mi vivo, elturmentis, subpremis oni min per malicaj maljustaĵoj...

Li atendis, kvazaŭ ili povis respondi, poste serĉis per la okuloj en la domo, ĉu estas io, kio taŭgus por memoro? Ĉu estas la saketo de la patro, la zoneto, la molaj pugnogantoj, kiujn li memoris de la infaneco, de tiu tempo mem, kiam prenadis lin la patro kiel ĥaradrion en longan vojaĝon — al la eksterlando aŭ al la malvarma Grumanto, apud kiu en frosta mara abismo vivas la Kankra caro, la oceana minaca mastro, kiun timas ĉio vivanta sur la akva fundo: de malgranda fiŝeto ĝis centarŝina besto — baleno.

Nenio restis: kun kio vivas rudristo, kun tio li mortas, ĉion, kion li havas, prenas la maro. Malplenas pakoj en lia domo, ne brilas arĝento en skatoloj, ne putras drapoj, satenoj, peltaĵoj en liaj keloj. Kio estis perlaborita, tio estis forvivita, kaj kion ja perlaboras fiŝisto? Farunon prunte, salon prunte, por kaftano drelikon prunte, kaj kiam venas kvitiĝo, li jam nenion ricevas. Pro tio li vizitas drinkejon. Kiu el la maro eliĝis, tiu iras rekte en banejon, kaj el tie en drinkejon. Laŭ tiu vojo iradis la avoj, laŭ la sama iradas la filoj, tio estas la sorto de la nepoj, kaj neniu, eble, ŝanĝos, venkos la sorton, donitan al barka rudristo de la severa pomora dio.

Ĉu foriris li, Ivano Rjabov, de sia sorto?

Ĉu foriris la patro, kiu ĉiutage kaj ĉiunokte esperis eliri en la maron ne sur ŝipeto, sed sur granda ŝipo, la patro, kiu kun fiero diradis, kiel li kondukos tiun ŝipon en forajn varmajn marojn, en landon Afrikon, iĝos tie la unua rudristo kaj revenos kun gloro kaj grandega riĉo.

Kio restis nun de Sabateo Rjabov, de lia sentimeco, de lia potenca forto, de lia rido laŭta kaj gaja, ruliĝanta, kiel kanona pafado?

Nenio restis. Nur en la memoro li restis, la patro, kun kanto, kiun kantadis li, revenante ebria el la drinkejo, — la amara, prema kaj mallonga, kiel la vivo mem de la Blankmara fiŝisto:

Jen karekso, verda herb',
En la kamp' amara herb'...

Multo restis en la memoro...

Jen knaras, detruiĝas barko, ĵetas ĝin tondrantaj sovaĝaj ondegoj, krucosignas sin dungitaj fiŝistoj, preĝas al sankta

Nikolao pri saviĝo, kaj la patro, tuta en mara ŝaŭmo, sub ĝemanta, hurlanta vento premegas tutforte la rudrostangon kaj raŭke, gaje sakras, ordonas forĉerpi akvon, ordonas malhisi la velon, ordonas kalfatri fendojn en la barko...

Tuta li, la patro, staras antaŭ la okuloj: gudro, kaj fokoleo, kaj fiŝaj skvamoj, algluiĝintaj sur la botojn. Kaj kiel li sidas, malkliniĝinte, sur benko, glatumas la humidan post bano barbon per la granda mano, aŭskultas riĉulojn-dungantojn:

— Faru komplezon, Ivaniĉ, konduku la barkon ne fore. Kiam tempesto falos, sen vi ni ne vivos, dronos sen krucosigno. Pro Dio, Ivaniĉ, ni irus nehaste, komplezu, kara...

Fuma lumo de kentorĉo diseriĝas en la malhela vitro de la botelo, la patro nehaste diras:

— Ĝuste tio estas malbona, ke ne fore. Se fore — pli bone estus. En la teron Afrikon mi irus. Oni diras, kvazaŭ estas tia. Aŭ ne? Kvazaŭ la popolo tie estas plene nigra, iradas ili nudaj...

La dungantoj interŝanĝas rigardojn pro la paroloj de la rudristo, diras pri la sia, verŝas en dikajn glasojn vinon, almanĝas per gado. La konversacio fluas malrapide, la rudristo evitas respondi, la dungantoj premas. Post la dua stofo ili interbatas la manojn pro interkonsento. Kaj morgaŭ jam ne estas patro, kvazaŭ li eliris por nelonge al najbaro por preni fajron, kvazaŭ li revenos tuj.

Tiel ili vivis, ĝis foje knaris la pordo, eniris griza pro maljuneco fiŝista avo, preĝis al la ikonoj, diris:

— La via do, Dia vidvino, forpasis. Prenis lin la maro. Mi mem vidis, kiel batadis lin la maro, batis al ŝtonoj, ne eltenis la

rudristo, frakasiĝis la barko. Forta tempesto falis, Dio savu kaj indulgu, tuj ilin la maro prenis, plenumiĝis super ili la Dia volo.

Dum mallonga tempo poste vivis la patrino, iris foje, ne vestiĝinte, por akvo en vintro, kaptis ŝin frosta febro — ŝi mortis. Kaj restis la Ĥaradrio sola en la mondo treni sian fiŝistan vivaĉon. El Ĥaradrio li iĝis dungito, el dungito eliris rudristo. Li iradis laŭ la sama vojo, el la maro en la banejon, el la banejo en la drinkejon, por drinki rememore al amikoj, por forgesi malvarman maran salon, sangajn vezikojn sur la manoj, knaradon de velboato, roradon de tempesto...

Li vivis kiel ĉiuj. Kaj jen — ĝisvivis.

La brigada rudristo Ivano Rjabov devas foriri de la gepatraj lokoj, fuĝi, kaŝiĝi. Pro kio?

Kun severe briletanta rigardo eliris la rudristo sur la peronon sub malgrandan oftan pluveton. Apogis per bastono la pordon, diris al la najbarino:

— He, honesta vidvino, prenu mian konstruaĵon, foriras mi...

La najbarino maltrankviliĝis, kun nekovrita kapo aliris pli proksime, demandis:

— Kien do vi, orfo?

— Pri mi ne maltrankvilu, sed la domo, mi pensas, estos utila. Kaj preĝu por Dia sklavo Ivano, ke ankaŭ li pli varme vivu en la Dia mondo. Kun tio adiaŭ, Gabrielovna!

La vidvino riverencis malalte.

— Ĉu al vi malfeliĉo okazis, Ivano Sabateiĉ?

Li nenion respondis, subridis kaj ekiris. Domoj en la fremdlanda Komerca korto estis brulantaj per longaj langoj, la flamo fajfadis kaj hurladis, fajreroj ne estingiĝadis sub pluvo, flugis flanken, bruligadis najbarajn domojn... La vidvino estis mallaŭte ploranta pri la bonkoreco de la fremda viro, krucosignadis ŝin postsekve, lamentis pri la sorto de la rudristo Rjabov Ivano Sabateiĉ.

2. Novgeedzoj

La ringon Taisja reen ne akceptis, kaj kiel ja li povis pensi, ke ŝi akceptos? Ŝi elaŭskultis ĉion, ekrigardis al li de malsupre supren, diris subite per profunda, nelaŭta voĉo:

— Popon necesas trovi, kaj jam hodiaŭ, ĉu vi aŭdas, Ivano Sabateiĉ?

Luphundoj de Antipo estis saltantaj apude, ĝoje jelpantaj, penante leki Rjabov-on al la vizaĝo. Li ĉiujn dispuŝis, ne kredante al siaj oreloj:

— Kian popon?

— Kiu nokte nin geedzigos kaj en la libron enskribos. Ekzistas tiaj — mi scias, aŭdis. Kiuj ŝtele geedzigas.

— Ĉu vi freneziĝis, Tainjo? Oni min eble morgaŭ en la monaĥejan malliberejon metos, ĉu multaj el tie eliris sur siaj piedoj? Kaj se ne metos, tiam en la ŝipo malliberigos, en «Ora nubo». Al kiu vi intencas edziniĝi?

— Al vi! — firme diris Taisja.

— Fuĝi mi bezonas el ĉi tie.

— Kaj ankaŭ mi fuĝos kun vi.

— Kien?

— Kien vi fuĝos — tien ankaŭ mi.

— Kaj se oni min kaptos?

— Se kaptos — mi vin atendos!

Poste ŝi koleriĝis kaj diris:

— Mi mem al mi tian edzon elektis, ĉu vi komprenis? Kuru al la leŭtenanto, veku, se li dormas, konduku ĉi tien: li kaj popon trovos, kaj defendos, dum la popo estos geedziganta. Kaj al Eŭdoĥa venu, vian oron prenu: popo ja antaŭ rigardi en la manon al altaro ne aliros.

Kaj ŝi puŝis lin je la dorso, por ke li iru pli rapide.

Li ekkuris, ne sentante sub si la piedojn, vekis avinjon Eŭdoĥa-n, mem bruligis fajron, mem lumis per kentorĉo, dum ŝi serĉis tiun lian paketon, kiu iam donis al li tiom da afliktoj...

— Ĉu ŝtele? — demandis la avinjo, oscedante kaj krucosignante la buŝon.

— Ŝtele! — per ĝoja flustro respondis la rudristo.

— Bona afero. Antipo furioziĝos, kaj diablo kun li! Ne gravas, vi bone elpensis — ŝtele...

En la subforno ekfrapis per la piedoj, eksnufis la erinaco, la virkoko maltrankviliĝis kaj kokerikis, sur la forna tabullito ekmoviĝis orfoj, prizorgataj nun de la avinjo...

— Post la geedziĝo do kien vi iros?

— Ni ne scias, avinjo...

— Estus bone ĉi tien, sed ĉi tie trovos vin Antipo...

Ŝi subridis, ŝia vizaĝo juniĝis, por momento la rudristo

ekvidis tiun fiŝistinon Eŭdoĥa-n, kiun ankaŭ nun, turnante la kapojn kaj ruze palpebrumante, rememoradis fiŝistoj-maljunuloj.

— Estu juneco, kaj cetero troviĝos, — diris ŝi kaj leviĝis.

Leviĝis ankaŭ Rjabov.

— Falu sur la genuojn, mi vin benos! — ordonis la avinjo.

Li malleviĝis sur la genuojn, ekrigardis al ŝi de malsupre supren. Ŝi benis lin per ikono de malnova pentro, donis kisi ĝin kaj staris iom, enpensiĝinte. Ŝiaj lipoj estis flustrantaj neaŭdeblan preĝon.

— Nun — iru!

Rjabov profunde riverencis kaj ekiris al la pordo. Ŝi de malproksime ordonis:

— Amu ŝin, ĉu vi aŭdas, viro?

— Mi aŭdas, avinjo! — ne returniĝante, obeeme respondis li.

— Kaj sciigon pri vi sendu!

De avinjo Eŭdoĥa Rjabov haste ekiris al la doganejo. Atanazio Petroviĉ ne estis dormanta, iradis en pensoj en sia ĉambro. La pluvego plu tamburadis sur la tabula tegmento, defluadis sur la korto per bruaj rojoj. Apud la doganaj tenejoj gardistoj frapadis per frapiloj, kriadis:

— Rigardu!

La gardostaranto respondadis:

— Iru vigle, gardu!

— Ĉu popon ŝi ekbezonis trovi? — penseme prononcis la

leŭtenanto. — Kaj ke ĝuste mi trovu?

Rjabov kapjesis.

— Eble, vi ambaŭ sen mi sukcesos?

La rudristo silentis.

La leŭtenanto demetis de sur ligna kroĉilo gudritan pluvmantelon, intencis surmeti sur sin, sed ŝanĝis sian decidon — surmetis sur la rudriston. Estis la leŭtenanto pli pala ol ordinare, lia supra lipo tikis, la okuloj rigardis negaje. En la korto li ordonis al soldato seli du virĉevalojn. La virĉevaloj estis prancantaj, mordantaj, la soldato sakris. Demĉjo estis profunde dormanta sur benko, ridetante en dormo.

Kiam ili elveturis, venis mateno, de la incendiejo estis rampanta akra fumo, estis plorkriantaj virinoj sur la ruinoj.

Al Taisja la leŭtenanto ne diris eĉ vorton. Rjabov sidigis la junulinon antaŭ si, la tro longe senmovaj ĉevaloj tuj ekkuris, elportis la rajdantojn sur kamparan vojon al bariero. La okuloj de Taisja, dum ili veturis, estis fermitaj, ŝi sidis kvazaŭ sen konscio, sed milda ruĝo estis brulanta sur la vangoj, kaj de tempo al tempo ŝi tremeradis, kvazaŭ pro malvarmo.

— Ĉu vi ne frostiĝos? — demandis Rjabov.

— Tenu pli firme! — respondis ŝi.

La virĉevalo dum rajdado ronkis. Taisja ĉiam glatumadis per la eta malmola polmo ĝian krutan ŝvitintan kolon, kompatis, ke al la ĉevalo estas peze. Krikov, ne retrorigardante, rajdis antaŭe. Proksime de putra preĝejaĉo Atanazio Petroviĉ abrupte haltigis la ĉevalon ĉe domo, enprofundiĝinta en la teron, sen ajna arbo aŭ arbusto ĉirkaŭe, desaltis en likvan gluan

koton. Malsekaj kornikoj kriis kolere, sub krutaĵo pigre, en nebulo, estis fluanta Dvino, la pluvo ree iĝis pli forta.

— Ĉu vi ne maldecidis? — demandis Rjabov.

— Ne maldecidis!

— Vi preskaŭ al latrono edziniĝas! — diris li. — Mi eĉ mian domon hodiaŭ fordonis. Kie vi dormos?

— Silentu, stulta! — respondis ŝi apenaŭ aŭdeble.

Krikov ne eliradis longe, poste elkondukis el la domo altan popon kun ezoka vizaĝo, postdorman, avidan, timigitan. La rudristo montris al li la oron, la popo ekkapjesis, ekriverencis, ordonis tuj alveturi al la preĝejo, mem alligis la virĉevalojn al trabo ĉe puto. Ŝmacante per la bastoŝuoj, sur la koto li kuris por sakristiano. La sakristiano, tute en plumoj — li estis senplumiganta virkokon, — ekkuris por diakono. Knare malfermiĝis la pordoj de la preĝejeto, ligna, traba, konstruita en malnovegaj tempoj...

Dum ili atendis, Krikov paŝadis apud la preĝeja perono — pensadis, kaj dum la geedzigo same estis pensema kaj malgaja, kaj poste skuis la kapon, per novaj okuloj ekrigardis al la rudristo kaj al Taisja, ridetis.

— Kien do vi nun, novgeedzoj? Kie festenos, kie maljunajn medojn drinkos, kie vino estis preparita?

La novgeedzoj silentis.

— De kie vi aperis por mia malfeliĉo, — ĉu ŝerce, ĉu kolere eldiris la leŭtenanto, — kien mi iru kun vi? Probable, Antipo jam serĉas...

— Serĉas, ne trovos, — diris Rjabov, — nun multaj nin

serĉas...

— Tro laŭte vi vivas, jen tial oni serĉas...

Ili ree ekveturis — ĉirkaŭire de barieroj, laŭ stratetoj de la urbo Arĥangelsko, sub malgranda pluveto, kien — nesciate. Taisja ekdormetis pro laco, vekiĝadis ofte, tremeradis, malsekiĝis plene. La ĉevaloj iris ne rapide — ili same laciĝis. Sur leviĝo Krikov malantaŭis, ordonis atendi. Li forestis dum longa tempo, finfine li aperis kun sako, alfiksita al la selo, kriis:

— Pli gaje, amikoj, baldaŭ ni venos...

Ili venis antaŭ vespero. La pluvo ĉesis, la ĉielo puriĝis, super Dvino estis tremanta ĉielarko. Virinoj nemalproksime estis kantantaj:

Dormemas mi, juna, dormetas.
Kliniĝas mia kapo sur kusenon;
L'amato en vestiblo paŝas,
Facile, mallaŭte parolas...

Blankaj kamomiloj estis florantaj apud dogana gardistejo, apud la akvo ĉio estis flava pro floroj de trolio, poste lilis geranioj, post la geranioj senlime sterniĝis Dvino. Ĉi tie estis ĝia fino — la maro. La virinoj ĉesis kanti — ekrigardis al la rajdantoj, interridante, decidis, ke tio estas soldatoj-gardistoj. Post paŭzo ili ree ekkantis:

L'amato en vestiblo paŝas,
Facile, mallaŭte parolas...

Ili kantis nelaŭte, tiel nelaŭte, ke eĉ emberizon ne timigis, kiu estis puriganta la plumojn nemalproksime de la dogana gardistejo.

— Nun ni ĉi tie gardistojn ne tenas. Dume kaŝiĝu ĉi tie, — diris Krikov. — Kaj se io nova okazos, mi soldaton sendos. Kun la soldato, Ivano Sabateiĉ, vi veturos: do, estos afero, se mi sendos. Manĝaĵo por vi dume sufiĉos en la sako, ĉi tie estas ankaŭ botelo da nupta vino. Eble, vi regalos min per ĝi, Taisja Antipovna?

Taisja eniris en la gardistejon, ĉirkaŭrigardis: forno neblankigita, ikonujo kun nigriĝinta ikono, post la ikono du lignaj kuleroj, sur breĉetita tablo basta skatolo kun salo, benko, tabullito por dormo. Ridetante, kvazaŭ ebria, ŝi eksidis, puŝis per la mano gliman vazistason — varma vento de la maro ekblovis en la gardistejo, ekodoris je la ĵusa pluvo, je ankoraŭ malsekaj herboj, je gudro de boato, kiu estis sekiĝanta sur la bordo...

— Mi neniam forgesos! — kuntirante la brovojn, diris Rjabov al la leŭtenanto. — Ĉu vi aŭdas, Atanazio Petroviĉ.

— Kiam oni dronas — hakilon promesas, kaj kiam oni saviĝos — tiam eĉ tenilon ne eblas elpeti, — respondis Krikov. — Bone, lasu, rudristo, ni kvitiĝos en la transmondo per braĝoj... Do, ĉu via mastrino regalos aŭ ne regalos la lacan gaston?

Taisja regalis kun riverenco. Krikov eltrinkis, diris abrupte:

— Nun mi pardonpetas, tempas veturi!

Taisja ree riverencis. Rjabov retenis unu virĉevalon, la kondukilon de la dua donis en la manon de la leŭtenanto.

Krikov pikis per la spronoj la ĉevalon, tiu baŭmis, tuj ekkuris per granda bela amblo, kaj baldaŭ trans la arbareto estingiĝis frapado de la hufoj. Taisja staris alpremiĝinte al

Rjabov, aŭskultis, kiel kantas nemalproksime mallaŭtaj virinaj voĉoj.

Dormu, dormu, vi, mia saĝulino,
Dormu, dormu, vi saĝulino,
Edzinigita frue,
Dormu, dormu, mia saĝulino...

3. Kaj kial ni ridas?

Matene venis kun gratuloj Demĉjo, alportis rondon da nupta pano, fremdlandajn sekvinberojn en basta skatolo, kandelon. Malalte riverencis al Taisja, ŝi kisis lin al la frunto.

— Vi estos por mi kiel frato, — aŭdis Demĉjo, — jen kiom da ni nun estas, — vi, kaj li, kaj ankoraŭ Krikov Atanazio Petroviĉ...

Ili lunĉis triope, manĝis bakitan kokinon, eglefinon, kiun hieraŭ en la sako alveturigis la leŭtenanto, altrinkis Dvinan akvon, poste sidis sub la suno.

— Ni kantu! — diris Taisja.

Demĉjo komencis milde, kvazaŭ knabino:

Kie do, fraĉjoj, ni pasigos tagon,
Nokton noktumos,

Taisja forte, per plena voĉo daŭrigis:

Por ni lito estu la ter'-patrino,
Por la kap' apogo — malmilda ŝtipo...

Rjabov estis kuŝanta sterne sur varmega sablo, avide rigardis al la vizaĝo de Taisja, tenis en la polmo ŝian maldikan manradikon, aŭskultis, kiel per du voĉoj akorde, kvazaŭ ne

unuan fojon, ili estis kantantaj:

Litkovrilo nia estu vent' sovaĝa
Superkovru ĝin neĝoj blankaj...

Dvino estis nelaŭte susuranta ĉe la bordoj, la suno estis varmiganta ĉiam pli forte, apenaŭ rimarkeble estis moviĝanta velo sur ŝipeto, eniranta en la enfluejon.

— Kial vi ne kantas? — demandis Taisja, kliniĝinte al la vizaĝo de la rudristo. — Kial vi enpensiĝis, Ivaĉjo?

Li suspiris, subridis, diris karese:

— Iel stranga ĉio estas. Mi kvazaŭ ne kredas...

— Sed vi kredu!

Ŝi estis rigardanta al li proksime, ŝian nazradikon kovris efelidoj, en la okuloj staris humida feliĉa brilo.

Demĉjo sidis flanke, transŝutadis sablon el unu polmo en la alian, rakontis:

— Patro via, Taisja Antipovna, hodiaŭ ĉie estis, eĉ kolonelon Snivin mem atingis, eksciis, ke vi kaŝe sur ĉevaloj forveturis, sed kien, tion al li neniu rakonti povas. La leŭtenanton li same vizitis, la leŭtenanto ŝajnigis sin nescianta. Ebria estas via patro, Taisja Antipovna, kaj kun li de la kolonelo sendito kun sabro, same ebria. Sur ĉaro kun du ĉevaloj tra la tuta urbo ili veturas kaj grandan monon kontraŭ la rudristo promesis, al tiu, kiu la oĉjon kaptos. Vi gardi vin nun bezonas forte.

— Ni fuĝos al Kola, ili ne trovos! — diris la rudristo. — La vojo ne longas — de Ĥolmogoro ĝis Kola entute estas tridek tri Nikola-temploj. Ĉu ni fuĝos, Tainjo?

— Fuĝos, — senzorge, pensante pri alio, diris ŝi.

— Sed ĉu vi aŭdas, pri kio mi parolas?

— Certe, aŭdas: ĉu ni fuĝu — vi demandas, ni fuĝos — mi respondas...

Kaj ŝi ekridis. Li same ekridis. Ekridis ankaŭ Demĉjo.

— Kiaj ridoj venis, — diris la rudristo. — Kaj kial ni ridas?

— Pri la hakilo mi rememoris, — plu ridante, eldiris Tainjo. — Kiel vi hakilon perdis...

Vespere Demĉjo foriris, kaj ree ili restis duope. De la maro ekruliĝis granda ondo, vento ekfajfis pli dense, sur la ĉielo ekrampis nuboj. Rjabov pririgardis la doganan boaton, kiu kuŝis sur la bordo, stupis ĝin, trovis la remilojn; grakinte, puŝis la boateton en la akvon. Taisja, fermetinte la okulojn, rigardis al la edzo.

— Ĉu por vi sen maro jam la vivo malbonas?

La rudristo kulpe palpebrumis, respondis ne tuj:

— Ja se ne necesas, tiam mi ne...

— Bone, ni iru! — kolere ridetinte, diris Taisja.

Ili eliris el la enfluejo senprokraste, la rudristo laŭte tra venta hurlado kriis:

— Lernu, edzino! Se oni forprenos min, vi mem iĝos rudristo. Estis ĉi tie en pasinta tempo iu Marta la plej bona rudristo, iradis ĝis la Kanina Kapo kaj pluen... Lernu, do, kie kio estas. Jen, vidu, — turbaĵo, tiu fluo fariĝas pro renkontiĝo, kiam mara ondo iras kaj la rivero al ĝi transverse batas. Turbaĵon evitu... Kiam vi al turbaĵo trafis, en la maron ĵetiĝu,

ĝin ne timu, timu ŝtonon, rokojn... Ostan bordon — tion timu, kiel ni ŝtonojn nomas: ostoj...

La vento impete, kun forto kondukis la boaton, kvazaŭ birdo enflugis ĝi en mallarĝan markoleton kaj, iomete kliniĝinte, preteris akrajn, nigrajn ĉebordajn rokaĵojn.

Sub vento, en griza nokta krepusko Rjabov rakontadis, kiel konduki ŝipojn en enfluejo, laŭ kiaj signoj memori malprofundaĵojn. Taisja sidis apude, tremeradis pro humida vento, alpremiĝadis al la edzo, demandadis:

— Ĉu tie ĉi ankaŭ grandaj ŝipoj povas trairi?

— Tio estas la Murmana brako, nefidinda, tra ĝi nur malprofundaj ŝipetoj pene trairas. Kaj poste, vidu, jen kien mi almontras, tio nomiĝas Aĉa Enfluejo, tute malprofunda, ĝin evitu. Kaj nun ĉi tien rigardu kaj memorfiksu, — reen vi mem kondukos. Tio estas Logilo, al ĝia fluvojo ne fidu, nun ĝi estas tia, kaj morgaŭ alie turniĝos, kaj vi trafos al malprofundaĵo...

Ne ellasante la rudrostangon, premante per sia flanko al ĝia trunko, en kaftano, dismalfermiĝinta sub vento, kun okuloj, akre mallarĝigitaj, li per unu brako brakumis Taisja-n je la ŝultroj, kliniĝis kaj komencis kisi la malsekan vizaĝon, la varmajn, malfermiĝintajn renkonten lipojn.

— Ni dronos, Ivaĉjo! — finfine diris ŝi.

— Sed kune ja! — respondis li.

— Estas domaĝe droni, Ivaĉjo!

— Nu, ĉe Dio ja ne estas la monaĥoj, la vivo estas pli facila.

— Ne blasfemu...

La boato turniĝis sub vento, ekiris, kliniĝante, tien, kien

pelis ĝin la vento, la rudristo ellasis la tenilon el la mano, la rudro turniĝis flanken...

— Ho, rudristo! — diris Tainjo. — Nu, kia vi estas sentima viro...

4. Vi, mia saĝulino...

Poste, ridante, Rjabov diris:

— Kaj kien ni trafis? Salikejo, ŝajne, ne devas esti... Prenu la rudron, edzino, elkonduku la ŝipon!

Taisja suspiris:

— Atendu, mi dormos.

Ŝi ekdormetis, kaj li longe ĉirkaŭrigardadis, poste abrupte movis la rudron, ekkondukis la boaton al la dogana budo, forte sidigis la karenon sur la sablan bordon, prenis Taisja-n sur la brakojn kaj enportis en la gardistejon. Fore en la vilaĝo estis kantantaj virkokoj, unu kriis, dua, tria, sonore bojis hundo. Li deziris manĝi. Rjabov verŝis en kruĉeton gdanskan vodkon, forskuis de sunsekigita hipogloso formikojn...

— Kaj mi? — demandis Taisja.

Ŝanceliĝante post dormo, ŝi alpaŝis lin, eksidis apude sur la benkon, elverŝis la vodkon sur la teron, silente, kun fermitaj okuloj, komencis maĉi nuran panon. Poste, kvazaŭ en dormo, diris:

— Kara.

— Kio?

— Kara mia! — ripetis ŝi. — Kara. Edzo. Kara.

Ŝi ekridis, alpremiĝis al lia ŝultro, suspiris. Kaj per severa

voĉo ordonis:

— Nun kuŝigu min dormi.

Mirante pri si mem, pri ŝi, pri ĉio, kio okazis, li ree prenis ŝin sur la brakojn, kuŝigis, eksidis apude. La okulharoj de Taisja tremeris, ŝi demandis:

— Kial vi ne kantas? Kantu! Panjo mia al mi kantadis...

— Sed se mi kanti ne scipovas ja...

— Ne gravas, iel kantu.

Li komencis, timetante, pri la karekso kaj la herbo.

— Ĉu indas tion aŭskulti, — kolere diris Taisja. — Kantu «Mian saĝulinon».

La rudristo tuspurigis la gorĝon, komencis plej melankolie:

Edzinigita frue...

— Ne de ĉi tie! — diris Taisja. — Neniu malhelpis, sed duono de la kanto malaperis. Kantu kiel necesas! Mi ordonis — kaj vi kantu!

La rudristo ankoraŭfoje tusis, ekkantis de la komenco mem:

Dormu, dormu, vi, mia saĝulino,
Dormu, dormu, vi saĝulino...

— Ĉu vi vidas? — diris Taisja. — Se vi deziras, vi eĉ kanti povas...

Ŝi brakumis lin je la kolo, proksime altiris al si, al la vizaĝo mem, kaj diris:

— Pereis vi nun, rudristo. Estis viro memstara, kaj nun kio? Kio vi estas nun? Kaj vodkon mi malpermesis trinki, kaj vi ne trinkis. Ĉu vi deziras, mi vin regalos?

Ne atendante respondon, ŝi salte ekstaris, verŝis el la botelo en la kruĉeton, duonon, pensinte, elverŝis sur la plankon kaj alportis:

— Trinku!

— Ĉu trinki?

— Trinku, se ordonite! Atendu, mi kun vi trinkos.

Ŝi lipis la brandon, sulkiĝis kaj kvazaŭ kun kompato suspiris, kiam la rudristo ĝistrinkis la restaĵon. Poste per firma mano prenis lin je la haroj, deklinis lian kapon malantaŭen kaj demandis:

— Ĉu amas vi min, Ivaĉjo? Kiel edzinon — ĉu amas? Diru tuj, alie mi foriros!

— Amas!

— Kaj la aliajn?

— Kiujn aliajn? — ne komprenis li.

— Aliajn viajn... diversajn...

Nun ŝi per du manoj estis tenanta lin je la haroj.

— Nu, kaj kio, se diversaj? Ĉio okazas...

Ŝi rigardis al li rekte, atendis.

— Eble sur pendigilo torturo estas pli indulga! — subridis Rjabov.

Taisja dolore abrupte tiris liajn harojn, kriis:

— Rakontu!

— Sed kion rakonti do, freneza?

— Ĉion rakontu, ĉu vi aŭdas? Ĉion ĝis la lasta vero. Ĝis la

plej malgranda...

Subite ŝi forpuŝis lin kaj petis per kompatinda voĉo:

— Neniam rakontu, kara, nenion rakontu. Kaj se mi petos kun larmoj, tutegale ne obeu, eĉ se kion ajn mi diros...

Li ridis kaj glatumadis ŝiajn harligojn, kaj ŝi rigardis al liaj okuloj sen palpebrumi kaj demandadis:

— Kiom vi povas jen tiel rigardi? Ĉu ĝis mateno povas?

Matene ree venis Demĉjo, alportis lakton en argila kruĉo, kazeon, rondon da pano, rakontis novaĵojn: lia eminenca moŝto Atanazio neatendite venis el Ĥolmogoro, forte koleras kontraŭ sinjoro kolonelo Snivin, ne benis, al la mano aliri ne permesis, ŝlosiĝis kun li kaj dufoje per sia bastono al la kalvaĵo regalis...

Sinjoro kolonelo Snivin eksidis hejme — ektimis, en la urbo iĝis pli kviete... Nur unu homo malfermite iris kontraŭ Atanazio — la angla fremdulo majoro James: li kvazaŭ skribis al Moskvo en Kukujon kaj al ĉiuj hodiaŭ minacis, ke en Kukujo liaj parencoj transdonos la leteron en la proprajn manojn de la monarĥo. Estas sola espero, ke tiu letero ne atingos siron Petron Aleksejeviĉ-on — la caro, onidire, estas naviganta sur boatoj de Vologdo malsupren, al la Arĥanĝela urbo.

La ŝarĝistoj, ĉiuj, kiujn oni arestis pro la falsaj moneroj, la ne arĝentaj, estas liberigitaj.

Ŝipestro Urquhart iradas sur ebriaj piedoj, sed iĝis pli kvieta kaj sian ferdekestron kvazaŭ eĉ ŝlosis en ĉenejon por severa fasto...

— Kaj kio pri niaj monaĥoj? — demandis Rjabov.

— Ja kio al ili fariĝos, — respondis Demĉjo, — kokerikas ebriaj kaj fiŝistojn turmentas. Oni diras, ke kelkajn fiŝistojn oni ligis kaj en la subtera malliberejo ŝlosis...

Rjabov kuntiris la brovojn...

Tiel, en kvieto, sub Dvina venteto, sub suna varmo, pasis ankoraŭ kelkaj tagoj. Rjabov faradis sur sekiĝinta pineto noĉojn, por ne konfuziĝi — kiom da tagoj li bojaras.

— Ĉu mi ne freneziĝos, ripozante tiom longe? — demandis li foje Taisja-n.

— Ĉu en la maron vi ekdeziris? — diris ŝi.

— Ja ankaŭ en la maron indus iri...

Li longe aŭskultadis, kiel bruas mara ondo, observadis nubojn en la ĉielo, rakontadis:

— Vidu aeron super maro. Se ĝi estas tro travidebla, ĉio malproksime videblas kaj ankoraŭ vento blovas, — estos tempesto, batos ĝi, tiam tenu vin. Se nebulo estas matene, jen kiel hodiaŭ, kaj hieraŭ vespere la ĉielo per ĉiuj farboj brulis, — iru trankvile, esperu... Ankaŭ al nuboj rigardu...

Taisja, mordetante herberon, rigardis al la rudristo persiste, ne deŝiriĝante, ĉu kun atento aŭskultis, ĉu entute ne aŭskultis.

— Sed pri kio vi pensas ja? — demandis li subite.

— Amas mi vin, — trankvile respondis ŝi, — pri nenio plia mi pensas...

Poste ŝi estis lavanta en Dvino, kaj li sidis apude kaj silentis. La maro estis bruanta fore trans ŝtonoj, tie fiŝistoj estis levantaj ankrojn, hisantaj velojn, forirantaj...

— Tiel ne eblas longe vivi! — diris Rjabov.

Taisja rektiĝis, viŝis la frunton, suspiris.

— Kiel do vi bezonas vivi?

— Mi estas de la mara afero laboranto, — respondis li, — kien mi iros sen ĝi?

Kaj kuntiris la brovojn.

Matene, tre frue, alrajdis dogana soldato kun ordono de leŭtenanto Krikov: sen ajna prokrasto veturi en la antaŭurbon, esti singarda, sur malgranda velboateto, kiu staras en la interkonsentita loko, transveturi sur la Mosean insulon, kie ĉion finrakontos Demetrio-tradukisto. Havi sur si bonan veston, neniom da vino drinki. Taisja Antipovna ne maltrankviliĝu, ne malĝoju, kaj ankaŭ al ŝi — la plej malaltan riverencon.

— Ho, Ivaĉjo! — timigite diris Taisja kaj paliĝis.

La soldato dum la vojo rakontis al Rjabov ankoraŭ novaĵojn: caro Petro Aleksejeviĉ el Ĥolmogoro jam hodiaŭ estos ĉi tie. Tie oni renkontis lin kun grandega honoro, la maljuna Atanazio havis sur si ornaton, oni pafis el kanonoj, en la katedralo oni kantis «Poliĥronion» kaj aranĝis tagmanĝon de la eminenco. Sed ĉio ĉi pasis rapide, kaj la caro tuj perpiede bonvolis vigle kuri al negocistoj Baĵenin-oj, kie li pasigis la tutan tagon — rigardadis la ŝipkonstruejon kaj observadis la ŝipkonstruadon.

Ĉapitro sesa

Ho, li faras por si, faras li malpezajn,
Ho, malpezajn jen galerojn ja...

Kanto

Mi petis, ke por mi estu farataj neniaj ceremonioj.

Petro la Unua

1. La juna ŝipestro

Sur la Mosea insulo, sub kurba betuleto, sur arbostumpo estis kviete sidanta Demĉjo; fleksante la fingrojn[49], li rakontis al Rjabov, kiu hodiaŭ veturas en la cara sekvantaro: kaj princo Golicin, kaj Saltikov, kaj Buturlin, kaj Ŝein, kaj Trojekurov, kaj Nariŝkin, kaj Pleŝĉejev, kaj fremdlandanoj — Patriko Gordon kun Lefort, kaj princo Romodanovskij...

— Jen do ni havos nun kun kiu la animon faciligi, konversacii en nia maniero, fiŝista! — subridis Rjabov. Kaj tiris la nazon de Demetrio:

— Vi same estas bojaro, kiel mi vidas. Eble, vi havas tie baptanojn?

Estis venanta griza, malhela tago, sur la ĉielo rampis ŝiritaj nuboj. Supre, ĉe la cara palaco, batis kanonoj, la sonora tondro longe staris en la oreloj.

— Jen kiele! — kun estimo diris Demetrio.

— Ni iru rigardi! — vokis la rudristo.

49 La rusoj kalkulas laŭ la fingroj, fleksante ilin *(trad.)*.

Ili aliris al traboj, al la akvo mem. Hodiaŭ estis malfacile rekoni la antaŭe kvietan Mosean insulon. Sur Dvino, sur ties malkruta bordo, sur glitiga, malsekigita de pluvo argilo staris amasoj da urbanoj, ĉifonaj ŝarĝistoj, sataj negocistoj, kiaj sur platboatoj venadas de la rivera supro al foiroj, transportas varojn el Jaroslavlo, el Kostromo, Vologdo, Solviĉegodsko; staris fiŝistoj en vadbotoj ĝis femuroj, en trikitaj ĵerzoj, en surĵetitaj sur la larĝajn ŝultrojn kaftanoj; staris grandkorpaj, akralangaj, gajaj fiŝistaj edzinoj; staris almozuloj, senpreĝejaj popoj, pilgrimuloj, fuĝintaj monaĥoj, Dvinaj boatistoj, mizeraj haŭlistoj, kiuj en grandaj brigadoj estis trenantaj negocistajn ŝipojn sur Dvino...

Por ordo kaj pompo inter la homamaso kaj la rivero, sur la bordo mem, etendiĝinte je longa linio, staris kubuton al kubuto pafistoj kun muskedoj kaj tranĉiloj. Rivera malvarma vento pufigadis grizajn barbojn de vilaĝestroj, movetadis baskojn de longaj verdaj kaftanoj, malsekiĝintajn en pluvo, sed la regimentoj staris senmove, kaj nur la grasdika, blankvizaĝa, obeza kolonelo Snivin veturadis jen antaŭen, jen malantaŭen, preskaŭ sur la Dvina akvo mem, ĉirkaŭrigardadis sian militistaron kaj feroce surtretadis per sia nigra virĉevalo tiujn el la malnobla popolo, kiuj estis pli viglaj kaj ŝoviĝadis inter la vicojn de la pafistoj.

Sur la Mosea insulo staris nemultaj kanonoj, sed la kanonistoj lertiĝis pafi per ili kun tia rapideco, ke la popolo nur miradis: kanonisto ŝovas pulvon, enigas per bastono stupon, ŝtopas firme, kaj oni jam portas meĉon. Li pafas, kaj ne atendante, ĝis la kanontubo malvarmiĝos tute, oni denove portas pulvon...

De la bordo, de la albordiĝejo al la domo kondukis larĝa riĉa irtapiŝo, sternita sur puraj tabuloj. La domo rigardis al Dvino per dek ruĝaj fenestroj kun vitraj kadroj, kaj apude estis ankoraŭ dometo kun ses trabaj fenestroj kun glimaj lapformaj kadroj, bunte kaj gaje farbitaj. Apud la pordoj tie kaj ĉi tie kreskis pinoj, kaj sub ĉiu pino staris gardisto — kun muskedo, kun lipharoj kvazaŭ de kato, kun tranĉilo sub la zono. En la domoj jam estis hejtataj la fornoj, estis videble, kiel el la tuboj jam iras fumo, kaj videblis la kuirejo, apud kiu kuiristo-fremdlandano, en ronda mallonga pantalono kaj ĉapo, estis forhakanta kapojn al supernutritaj, alveturigitaj de malproksime, obeemaj anseroj.

Dum la rudristo estis pririgardanta la caran domon kun la kuirejo, la popolo sur la bordo furioze ekkriis, ree pafis kanonoj — tiel, ke dum ioma tempo Rjabov tute nenion aŭdis, kaj ekaŭdis poste, kiam ekludis klarionistoj kaj, larĝe malferminte la buŝojn, ekkantis katedralaj kantoroj. La homamaso ankoraŭ moviĝis antaŭen kaj haltis.

La pluvo nun verŝiĝis pli forte, ol antaŭe, kaj ĝiaj densaj strioj estis vipantaj la homojn, la teron, la hulan supraĵon de Dvino, kies alia bordo nun tute ne videblis en la densa reto de la pluvego kaj nur diveneblis fore sub pezaj grizaj ŝvelaj nuboj.

Starinte iomete kaj nenion vidinte bone, ĉar la pafistoj kaj rajdistoj estis ŝirmantaj por li la ŝipojn, venantajn laŭ Dvino, Rjabov grimpis supren, tien, kie staris kanono, pensinte, ke en tiela tumulto neniu patro ekonomo aŭ rajdisto interesiĝos pri li, rudristo...

La bildo, aperinta antaŭ liaj okuloj, frapis lin: grandaj pezaj barkoj kaj remŝipoj, novaj, ornamitaj per silkoj, persaj kaj

tataraj tapiŝoj, per broditaj teksaĵoj, kun standardoj kaj flagoj estis venantaj el la malbonvetera obskuro. La remistoj levadis la remilojn, ŝipanoj ĵetadis haŭserojn, la ŝipoj kun knaro albordiĝadis. Sur la bordo tondris klariona muziko, ekscitite batis sonoriloj, kaj elirinta antaŭen katedrala ĥoro dolĉe kantis «Gracon».

Kaj sur la barkoj tiutempe unu post la alia aperadis homoj, vestitaj kun tia brilo kaj riĉo, kian Rjabov ankoraŭ neniam vidis en sia vivo.

Plej multaj el tiuj homoj, evidente, frostiĝis dum la vojo sub pluvo kaj vento, multaj envolvis sin en longajn mantelojn kaj kun malplezuro rigardis al flakoj de la Mosea insulo, al la dometo, kiu al la dvinanoj ŝajnis palaco, al la furiozanta, krianta popolo, al la rajdistoj, dekstren kaj maldekstren disdonantaj vipajn batojn. Sed la kuntiritaj brovoj kaj la malkontentaj vizaĝoj nur estis donantaj al la cara sekvantaro plian majestecon kaj servis por voki en la popolo respekton kaj timon.

Rjabov ne sentis timon, sed nur, ekvidinte la kolerajn mornajn vizaĝojn de la sekvantaranoj, pensis: «Jen, kiaj birdoj» kaj komencis serĉi, kie estas la caro. Sed homoj sur la barkoj kaj remboatoj estis tiom multaj kaj vestitaj tiom bele, ke li ne sciis, kien rigardi: jen ĉapelo ŝajnis al li vere cara; jen tro pufa peruko — certe, la caro; jen iu dikventra korpulenta barbulo ridis tro libere — ĉu ne la caro? Kaj alia rigardas kolere, kiel besto, eble, li estas la caro?

La unuan, plej grandan barkon homoj en mallongaj kaftanoj per haŭseroj altrenis al la albordiĝejo kaj intencis jam fiksi ĝin, kiam subite altega ulo, aspekte aĝa dudek kvin jarojn, sen ĉapo,

kun malhelaj krispaj haroj, komencis diri, ke ili faras malĝuste, necesas alie, por ke sufiĉu loko ankaŭ por alia ŝipo. La homoj en kaftanoj disputis, poste obeis, kaj komencis ĉiuj kune treni la ŝipon laŭlonge de la albordiĝejo. Dum ili estis laborantaj, li kun scio, sen hasto komandis ilin. Kaj la pluvego plu estis vipanta lian senĉapan buklan kapon, la grizbrunan mantelon, apenaŭ teniĝantan sur unu ŝultro, la malbutonumitan ĉe la kolo nerusan ĉemizon.

«Ŝipestro ilia», — pensis la rudristo. Aŭskultinte, kiel ordonas la nigraharulo al la cara sekvantaro, li ankoraŭ decidis por si: «grandan potencon li prenis, tamen!»

Kaj la caron li ne sukcesis trovi: tro multe da sinjoroj staris en la barkoj — kaj pufaj pro orgojlo, kaj koleraj, kaj gravmienaj, altrangaj, en plumoj, perukoj, rubandoj, en altaj bojaraj ĉapoj, — ĉu eblas trovi, kiu el ili estas la caro.

Intertempe la unua barko kun la remŝipo aliĝis al la albordiĝejo, la tria estis altirata, kaj la ceteraj ŝipoj plu atendis sian vicon ĵeti haŭserojn kaj altiriĝi. De sur la unua barko homoj en verdaj kaftanoj eltrenis larĝan tabulon kaj transĵetis ĝin sur la bordon, kaj la bukla ŝipestro al ili kriis, ke ili ree ne tiel faras, kaj, dispuŝinte la barbajn bojarojn per la longaj brakoj, mem komencis meti la ponteton pli fidinde kaj pli firme. Kaj metinte, li riverencis kaj faris invitan geston per la mano.

Tiam Rjabov ekvidis la caron. Caro Petro Aleksejeviĉ staris apud la ponteto mem, kuspinte malantaŭen ore broditan mantelon, apogante sin al alta, briletanta per gemoj bastono kaj bene, favore ridetante per sia diketa blanka, kun vangaj kavetoj, vizaĝo. Li rigardis ne al la homoj, kolektiĝintaj sur la

bordo, ne al sia laŭtkria bukla ŝipestro, ne al la rajdistoj, ne al la standardoj, ne al la kantoroj en malsekiĝintaj surplisoj, sed ien for kaj alten, ien inter la pluvo kaj la nuboj, ĝuste tien, kien devas rigardi caroj, plenaj de majesto.

«Jen kia!» — pensis Rjabov kaj per la kubuto puŝis senmoviĝintan apude kanoniston. Tiu ĵetis rapidan rigardon al Rjabov kaj diris:

— Nu, kia caro! Ĉu tio estas caro?

— Kaj kio? — demandis la rudristo.

— Ja tro simpla! — prononcis la kanonisto.

— Bona simpleco! — subridis Rjabov. — Tuta en oro kaj en gemoj, staras, ne moviĝas...

Afable, sed severe ridetante, la caro senmove rigidiĝis sur la ponteto. Lia mano en ringoj estis premanta la valoregan bastonon. La sonoriloj batis kun nova forto, la kantoroj sonore, superinte obtuzan susuradon de la pluvo, alde komencis «Ĝoju, Jerusalemo». La caro ankoraŭ atendis, poste faris paŝon antaŭen laŭ la fleksiĝanta, kovrita per tapiŝo ponteto, kaj subite en tiu solena momento la longkrura ŝipestro faris trukon, kaj tian, ke Rjabov aĥis: li submetis al la caro sian piedon en altboto. Tiu stumblis, la ŝipestro puŝis lin al la dorso kaj laŭte ekridis. «Pereis la ulo!» — pensis Rjabov, sed la ŝerco pasis por la ŝipestro neatendite facile. La caro nur svingis al li la liberan manon kaj ekiris supren laŭ la balanciĝanta ponteto. Kaj la ŝipestro plu ridis, skuante la longharan buklan haron, kaj aliaj sekvantoj same ridis. Kaj Rjabov kolere pensis: «Se mi estus caro, vi ne ridus pri mi!»

Post la caro — vice, gravmiene — ekiris al la domoj la cara

sekvantaro — bojaroj, fremdlandanoj, princoj kaj altranguloj. La pafistoj, alveturintaj kun la caro, jam viciĝis laŭlonge de la vojeto, antaŭ la pafistoj estis grimacantaj caraj bufonoj. Renkonten al la Siro, blanka pro timo, elkuris negocisto Litkin kun arĝenta plado en la manoj. La ĥoro komencis himnon «Disinjoro montriĝis al ni», Litkin, ne aŭdacante surpaŝi la tapiŝon, ne komprenante, kion krias al li aliaj negocistoj, falis sur la genuojn en flakon kaj etendis al la caro la pladon kun pano kaj salo[50]. La caro, ne malrapidiginte paŝojn apud Litkin, la pladon ne akceptis kaj movis la kapon malantaŭen, kvazaŭ dirante, ke ne al tiu ĝi estas donata. Litkin aĥis:

— La panon ja, Siro, je Dio mi petas...

Sed la caro ne plu retrorigardis kaj malrapide la unua eniris en la vestiblon de sia palaco.

La ĥoro eksilentis, la sonoriloj estis sonorantaj ĉiam malpli rapide, finfine ankaŭ ili eksilentis. La kanonisto, ridetante, diris al Rjabov:

— En la pasinta jaro oni same ne tuj rekonis...

— Kiun? — demandis la rudristo.

En tiu momento el la vestiblo eliris sekvanta bojaro, ion ordonis al la kantoroj, kaj mem ĉe tio ekridis. La kantoroj — hastante, erarante — denove ekkantis, la kanonisto ŝovis la meĉon al la kanono, ĝi pafis, la sonoriloj eksonoris kun nova forto, kaj la popolo ree turniĝis al la barkoj, kie estis laborantaj homoj, malŝarĝante sakojn kaj barelojn, kaj kie estis pasumanta plu la sama longkrura ŝipestro, interparolante kun blanka maldika sekvantarano.

---

50 Rusa signo de bonvenigo *(trad.)*.

«Kiu do tiam estas la caro? — kolerante pri tio, ke ĉio estas tiel nekomprenebla, demandadis sin Rjabov. — Ĉu tiu ĉi?»

Sed la blankvizaĝa sekvantarano havis en si nenion majestan, kaj el la barkoj jam neniu povis eliri, krom nur homaĉoj en kaftanoj, ŝarĝistoj, ŝipanoj kaj laboruloj.

La ŝipestro subite faris iajn ordonojn sur la barkon, klinis la kapon kaj rapide ekiris laŭ la tapiŝa vojeto — al la domo. Li ne rigardis al flankoj, ne levadis la okuloj disde la kovraĵo, kaj estis videble, ke iri sub rigardoj de la homamaso al li estas ĝene: liaj paŝoj estis rapidaj, malglataj, pezaj, la ŝuoj laŭte frapadis, kaj la malsekaj malhelaj haroj estis balanciĝantaj apud la vangoj... Post li rapide iris la sekvantarano.

Renkonte al la ŝipestro tondris, dolĉe kaj beate kantis la katedrala ĥoro, tiris sin la scivolema homamaso, rampis la tute blanka, ŝvela, ĝismorte timigita negocisto Litkin kun la arĝenta plado, sur kiu estis malsekiĝanta sub la pluvo la pana rondo.

Subite la ŝipestro haltis antaŭ la komercisto, ne levante la kapon, akceptis de li la pladon, riverencis, donis al la sekvanto kaj kaŝiĝis en la palaca vestiblo. La popolo komencis krii, hurli ravite, — nun ĉiuj komprenis, kiu estas la caro. La ĥoro finkantis la lastan strofon, la kanonoj ankoraŭfoje pafis, kaj ĉio eksilentis.

«Jen kia caro! — pensis Rjabov kaj gratis la nukon. — Kia do tio estas caro? Ne, fraĉjoj, tio ne estas caro! Tiaj caroj ne ekzistas!»

2. Pensojn oni ne impostas!

Li ankoraŭ longe staris kaj rigardis post la caron. Poste iu tuŝis malantaŭe lian manikon. La rudristo retrorigardis kaj ekvidis Atanazion Petroviĉ-on.

— Ni iru, Ivano! — vokis la leŭtenanto. — Cara tablestro Silvestro Ievlev kaj kun li nia vojevodo Apraksin Teodoro Matejeviĉ nemalproksime staras, al Dvino rigardas. Eble, io rezultos el nia konversacio...

— Kaj se ne rezultos? — demandis Rjabov. — Ĉu la vojevodo ne scias, kion fremdlandanoj ĉie faras? Tamen li al ili en nenio kontraŭas!

Krikov suspiris.

— La vojevodo nur pri unu afero estas okupita — vi mem scias — li ŝipon konstruas. Ni iru, rakontu. Kaj se ni ne trovos justecon, tiam — homoj en multaj lokoj vivas. Nia lando ne estas malriĉa, estas kaj Kemo, kaj Lopo. Sur bordoj de Kemo homoj loĝas, kaptas salmojn por solovkiaj monaĥoj. Sur Vigo kaj Soroko oni loĝas, sur Virmo, kaj sur Sumo, sur Umbo kaj Varzugo. Salfarejoj monaĥejaj ankoraŭ estas, segmueliloj, al Kandalakŝo eblas foriri, sur la Teran, la Vintran bordojn...

— Pro kiaj do pekoj mi foriru?

— Homoj eĉ pli puraj ol ni sin per larmoj lavas! — malgaje respondis Atanazio Petroviĉ.

Vojevodo Apraksin — juna, sed jam dikiĝanta homo, kaj la sekvantarano, ĝuste tiu, kiu antaŭnelonge akceptis la panon el la manoj de la caro, — nealta, palvizaĝa, bluokula, en mallonga militfasona kaftano — estis starantaj sur monteto, ridantaj pri io kun aliaj sekvantaranoj.

— Ĉu ni aliru? — demandis Krikov.

Rjabov kapjesis. Kiam ili estis tute proksime, Apraksin ekrigardis al ili per nepalpebrumantaj severaj okuloj.

— Al via moŝto, princo-vojevodo! — ĝentile eldiris Atanazio Petroviĉ.

La sekvantaranoj turniĝis, ĉesis ridi. Apraksin demandis:

— Leŭtenanto Krikov?

— Krikov, princo-vojevodo.

— Hodiaŭ vin al mi montris kolonelo Snivin, plendis...

Atanazio Petroviĉ staris trankvile, rigardis en la okulojn de la vojevodo.

— Ĉu vi estas ĝuste tiu oficiro, kiu falsan monon, ne arĝentan, malkovris sur ŝipo fremdlanda?

— Mi, princo-vojevodo.

Ievlev kaj Apraksin rapide interŝanĝis rigardojn.

— Pro senĉesa okupiteco pri ŝipaj aferoj mi ne esprimis ĝustatempe al vi mian dankon, — ekparolis la vojevodo. — Vi, sinjoro leŭtenanto, agis inde, kaj, malgraŭ la plendo de kolonelo Snivin, kiu eraras kaj ne scias la veron, mi nun havas honoron esprimi laŭdon al via kuraĝa ago. En ĉi okazo vi, sinjoro, montris grandan *fermeté*, kaj mi tre ĝojas pri tio, ke mi havas en mia vojevodujo tian oficiron...

Kio estas «*fermeté*», Krikov, same kiel multaj sekvantaranoj, ne komprenis, sed ke la vojevodo estas kontenta pri li — komprenis tuj kaj gajiĝis. Li tuj rakontis la tutan historion de la rudristo kaj ĉiujn ofendojn, faritajn al li

lastatempe. Atanazio Petroviĉ parolis rapide, kun peno retenante emocion. La vojevodo kaj aliaj sekvantaranoj aŭskultis kun intereso, ĵetadis al Rjabov kompatajn rigardojn, demandadis, se ion ne komprenis.

— Ĉi rudristo povus ankaŭ mem atingi min, — diris Apraksin. — Ne estas granda laboro konversacii kun mi. Mi tagojn kaj noktojn pasigas en ŝipkonstruejoj — aŭ en Vavĉugo, aŭ en Solombalo...

— Dio estas alte, caro malproksime! — respondis Rjabov. — Por vin, princo, atingi, al multaj necesas riverenci, sed riverenci ni, blankmaranoj, malbone scipovas. Nia dorso estas nefleksebla...

— Ĉu fieraj, mi pensas? — kun facila rapida subrido demandis Apraksin.

— Ni scias nian lokon! — malmilde respondis la rudristo. — Por Artamonoj — limonoj, kaj por ni bravuloj — betuloj.

La vojevodo silentis iom, poste prononcis trankvile:

— Tia de Dio estas ordo de la komenco de la tempo.

— Ĉu vere?

— Kaj vi kiel pensas?

Rjabov silentis, per ridetantaj okuloj rigardis al Apraksin.

— Kial vi ne diras?

— Pensojn oni ne impostas! — senhaste diris Rjabov. — Silenti estas pli konvene...

— Memorante la ukazon de lia cara moŝto, — rapide interrompis la rudriston Krikov, — trovis mi mia devo prezenti

antaŭ viajn okulojn ĉi faman en Blankmario rudriston, por ke la granda ŝipestro povu konvinkiĝi, kiom gloraj marlaboristoj el niaj pomoraj loĝantoj povas al lia cara servo esti prezentitaj...

La bluokululo kapjesis — sufiĉas, ja kio en tio povas esti nekomprenebla. Kaj demandis afereme:

— Ĉu ajnan ŝipon vi, rudristo, kondukos?

— La afero ne estas komplika. Sufiĉas havi kutimon.

— Kaj tempeston vi ne timos?

— Kial ne timos? Kiu sur maro ne estis — tiu timon ne vidis, kiel oni diras ĉe ni. Ne ekzistas tia homo, sinjoro, kiu ne timas. Nur necesas teni sin, la promeson memori...

— Kian tian promeson?

— Nu jen, ekzemple, mi estas ĉefo sur boato aŭ en tuta brigado. Do mi promeson faris al la homoj, kiuj sur la bordo restis, ke mi ne estos viva, se pro mia kulpo aliaj fiŝistoj pereos. Tia ĉe ni estas moro en la Arĥanĝela urbo, en la ŝipa haveno, en la boata azilo. Kiel ĵuro. Promeso donita, kiel kuglo pafita...

Li rekte ekrigardis en la bluajn atentajn okulojn de la tablestro, tiel malfermite ekrigardis, ke Ievlev kun ĝojo ripetis la proverbon:

— Promeso donita, kiel kuglo pafita.

— Tia estas la moro, sinjoro.

— Do, ĉu vi iĝos ŝipisto de la caro?

— Eblas.

— Do, — diris la tablestro, — la paperon mi por vi aranĝos.

Pasumu dume ĉi tie, atendu... La princo-vojevodo por vi skribos...

Li kapbalancis kaj ekiris kun Apraksin al la palaco, sed survoje retrorigardis: la rudristo senĉapa, en pura, malbutonumita sur la proda brusto ĉemizo, estis staranta, ĉirkaŭita de la caraj ludmilitistoj. La sekvantaranoj estis pri io demandantaj, li estis respondanta, subridante.

— Bona ulo! — diris Silvestro Petroviĉ al Apraksin.

— Por mi ĉi popolo jam ne estas mirinda! — respondis Teodoro Matejeviĉ. — Komence mi same miradis, kaj nun kutimiĝis...

Ievlev revenis baldaŭ, elportis paperon kaj laŭtlegis, ke Rjabov Ivano filo de Sabateo ekde la nuna tago estas destinita esti en la cara sekvantaro kiel «matroso ŝipa» kaj pro tio al neniu estas permesite aresti lin sub minaco de cara kolero. Leginte, Silvestro Petroviĉ ordonis kaŝi la folion fidinde, kaj vespere esti ree sur la Mosea insulo.

— Ĉu vi ĉion komprenis, rudristo?

— Ĉion, sinjoro.

— Riverencu! — flustris post la dorso de Rjabov iu el la sekvantaranoj. — Falu al la piedoj!

La rudristo retrorigardis, diris digne:

— Mi eĉ al Dio ĝis la tero ne riverencas.

Li faldis la paperon duone, kaŝis ĉe la sino. Ievlev senvorte, gaje rigardis al li. Poste li turniĝis al Atanazio Petroviĉ, demandis konfide:

— Ĉu multe fremdlandanoj ekscesas ĉe vi?

— Multe! — kun retenita kolero respondis Krikov. — Tiom multe, sinjoro, ke ni ne scias, kiel bridi ilian genton. Ili tute nian gorĝon premas, ne eblas spiri...

Konversaciante, ili atingis la bordon. Ĉi tie estis atendanta Demĉjo. Ievlev kaj Krikov plu interparolis. Demĉjo, lamante, aliris, demandis nedecideme:

— Nu, oĉjo?

— Folion oni donis! — diris Rjabov. — Nun vi kaj mi ne pereos, Demetrio. Nun ankaŭ ni, kiel homoj, eble spiros iomete. Estu konstante ĉe mi, mi dirados, ke vi estas mia helpanto...

3. Estos tago, estos pano!

Ĉi tie, apud kurba betuleto, malsekiĝinta sub pluvo, staris malnova ŝalupo de karelo Ignato. Mizeruloj, metiistoj, bakistoj el Kuzneĉiĥo, ŝarĝistoj, zonitaj per bastaj zonoj, du ebriaj ŝipestroj de fremdlandaj ŝipoj, blindulo kun kondukanto, kantoroj de la katedrala ĥoro kun envolvitaj en juton surplisoj, koleraj frostiĝintaj monaĥoj, gardistoj kun halebardoj, pafistoj de la Pudoĵa enmariĝo, doganaj oficistoj, — diversaj homoj amasiĝis en la ŝalupo, kiam la rudristo kun Demĉjo eniĝis tien.

Ignato prenis neniun plian, kvankam sur la bordo tumultis homamaso. Por ŝerco li pretere kroĉis per hokstango longakruran virinon je la basko; respondante al insultoj, forpuŝiĝis, levis sur la maston la truitan velon. Volontuloj elektis por si remilojn, tri paroj da longaj remiloj akorde leviĝis. Ignato kaptis la rudran remilon, direktis la ŝalupon, kriis raŭke, ke oni donu monon, alie li renversos la barkon.

La pluvo verŝiĝis pli forte, la vento pli abrupte batis al la velo, la masto ekknaris, la mallerta peza ŝalupo sub la vento iĝis malpeza, ekiris sur Dvinaj ondoj anaspaŝe. La mizeruloj ekkantis psalmon.

En griza pluva nebulo sur fremdlandaj ŝipoj oni fojfoje sonigadis sonorilojn, por ke ilin ne trafu iu ŝipeto, trumpetadis, kriadis:

— Rigardu!

— Gardu vin!

— Atentu, pasantoj!

Skulptitaj, grandegaj, farbitaj per minio, karmino, garnitaj per kupraj bendoj, pendis super la ŝalupo la poboj de negocistaj ŝipoj. Elstaris el kanonaj paftruoj kanonoj, staris grasa odoro de gudrita ŝnuraro, de peĉo, kaj kiam la ŝalupo estis ĉirkaŭiranta iun ŝipon ĉe la pruo, tiam desupre, de la alto, senpalpebrume rigardis okuloj de monstroj, elĉizitaj el ebono, — de nudaj virinoj, de serpentoj kun homaj vizaĝoj, de hirtaj maljunulinoj, de maraj reĝoj kun barboj, kun feraj oritaj ĉenoj sur la koloj.

La ŝalupo iris nerapide, fremdlandaj ŝipanoj sen intereso, per enuaj, al ĉio kutimiĝintaj okuloj rigardadis desupre al la ŝipeto, al la akvo, al la plata bordo, al la malaltaj konstruaĵoj, fumadis siajn pipojn, volvadis sin, kuntiriĝinte, en longajn kapuĉmantelojn.

La ŝipoj staris dense. Sur iuj ludis muziko, oni dancis, sur iuj okaze de dimanĉo estis farata diservo, — kaj tiam el la rondaj, garnitaj per mahagono fenestroj aŭdiĝis herezaj kantaĵoj, longa «ame-en», balbutado de pastro. El aliaj fenestroj aŭdiĝadis virina rido, basa ridego, violona skrapado.

El ankoraŭ aliaj venadis odoroj de vianda kuiraĵo, de rostita sur stango femuraĵo, de siblanta sur braĝoj fiŝo. Sonoj aperadis por mallonga momento, anstataŭante unu la alian.

— Legu! — ordonis Rjabov kaj etendis al Demĉjo la paperon, kliniĝinte super ĝi, por ke la pluvo ne malsekigu la necesajn vortojn.

Demĉjo legis.

— Jen kiele! — eldiris la rudristo.

Liaj okuloj estis gajaj.

— Nun ni transportos Taisja-n Antipovna-n al Eŭdoĥa, fiŝita avino, kaj poste ni vidos. Eble, ni ankoraŭ vivos, Metrio!

— Ni vivos! — konsentis Demĉjo.

— Tiele, frato!

La ŝalupo albordiĝis al boatoj, dense starantaj apud la fremdlanda Komerca korto. La urbaj monaĥoj, la gardistoj, la virinoj kun ekkrioj eksaltis laŭ la balanciĝantaj sur la akvo boatoj al la bordo. Ignato ekskoldis la kantorojn, kiuj ne pagis la veturon. La grandlipulo el la drinkejo kun krio trafalis inter la ŝalupo kaj la boato, kaj kiam Rjabov eltiris lin el la akvo, la okuloj de la lipulo blankiĝis pro timo — li rekonis la rudriston. Kio estos, se li demandos pri la dolĉaĵoj? Sed Rjabov nenion demandis, ekiris laŭlonge de Dvino, timetante renkontiĝi kun Timotejev: kontraŭ la maljunulo la papero ne defendos, ne pri tio estas la papero, kaj la maljunulo ne estas simpla.

Antaŭ la nokto la rudristo vizitis la enfluejon, prenis el la gardistejo Taisja-n, apogis la pordon de la domaĉo per bastoneto — laŭ la kutimo.

— Iom staros malplena nia palaco! — diris li kun subrido.

— Sed ĉu ne palaco? — kun apenaŭ kaptebla ofendiĝo en la voĉo respondis Taisja. — Vera palaco. Al vi estis malbone ĉi tie, ĉu?

Avinjo Eŭdoĥa renkontis Taisja-n per malalta riverenco, demandis, ĉu bone vivas la fiŝista edzino, metis sur la tablon fiŝan rondan pirogon. Orfoj, lavitaj, scivolemaj, estis kliniĝantaj de sur fornaj tabuloj, kurantaj tra la domo, kiel diablidoj...

— Kiom da ili vi havas, avinjo? — demandis Taisja.

— Nun nur kvar, — respondis Eŭdoĥa kaj svingis al ili viŝtukon: — Huŝ, vi! Kial vi kuradas?

— Ja ni pirogon! — diris netimema voĉo de sur la forno.

— Vi krevos!

— Ne, ne krevos...

Kiam la orfoj kvietiĝis, al Demĉjo estis ordonite tralegi la caran dokumenton por Taisja kaj la avinjo. Demetrio tuspurigis la gorĝon, kiel kantoro en preĝejo — tralegis, Eŭdoĥa suspiris, balancis la kapon:

— Jen doktaĵo!

Taisja per varmegaj okuloj rigardis al Rjabov, per rapida flustro instruis:

— Vi, Ivaĉjo, pli kviete tie vivu; se ia interbatiĝo aŭ batalo — vi iru flanken, ne serĉu la veron, la unua ne ĵetiĝu. Bonvolu, Ivaĉjo...

— Bonvolu, Ivaĉjo, bonvolu, Tainjo, — diris Rjabov, —

kiel sukcesos, tiel mi vivos...

— Vorton diru, ke la patro nin pardonu...

— Iru for via patro, — respondis Rjabov, — ne bezonas ni. Estos tago — estos pano... Jen, kiel avinjo Eŭdoĥa vivas, tiel ankaŭ ni vivos...

Ili dormis duope kun Demetrio sur humida pajlo nemalproksime de la cara domo, kie aranĝis pajlokabanetojn malpli altrangaj uloj el la cara sekvantaro, el ludsoldatoj, el pafistoj. Caraj gardistoj iradis laŭlonge de Dvino, en la humida aero intervokadis voĉoj:

— Rigardu!

— Atentu, rigardu!

Estis silento, ĝin rompadis nur voĉo de gardisto, krakado de humidaj branĉoj en lignofajro, egalmezura ronkado el tendo, kovrita per branĉoj, subtila kula zumado...

Kaj kiam ili ĵus, kiel ŝajnis, sukcesis ekdormi — ekhurlis klarionoj, ekbatis tamburo, en pajlokabanoj oni ekbruis, iu ulo surpaŝis la manon de Rjabov per la piedo, — ili devis leviĝi. Ĉie en la maldensa bosketo estis videbla moviĝo, neniu jam dormis: iu kuris al Dvino lavi sin, iu estis blovekscitanta lignofajron, por pli rapide kuiri kaĉon, iu estis krianta, kiu kiun laboron faru.

Rjabov tiris sin, oscedis, lavis sin sur Dvino, preĝis nelonge kaj ĵus intencis diri «amen», kiam nekonata soldato jam ektiris lin post si, urĝante kaj pelante, al nigra gudrita jaĥto, kiu staris apud la palaco ĉe novaj tabuloj de la albordiĝejo.

Ankaŭ ĉi tie estis multaj homoj: ili ruladis sur la jaĥton

barelojn, portadis bastosakojn, trenadis bastokorbojn. Sekvantaranoj en riĉaj vestoj laboris, kvazaŭ simplaj ŝarĝistoj. Kaj Rjabov iĝis ridema, kiel ili ĉiuj ion timas, ĵetas rigardojn al la jaĥto kaj ĉion faras rapide, senprokraste. Sed kiam ili ne videblas de sur la jaĥto, tiam ili kaŝiĝas kaj babilas inter si.

Sur la jaĥto, ĉe la ponteto, tenante sin je ŝnuro, staris la hieraŭa longkrura krisphara caro-ŝipestro, konversaciis kun urbano el Vavĉugo — riĉa Jozefo Baĵenin. Alia Baĵenin, Teodoro, staris pli malproksime, elstariginte per la manplato la orelon, aŭskultis, pri kio la caro parolas kun la frato. Ekvidinte Rjabov-on, Apraksin almontris lin al Petro Aleksejeviĉ. Tiu laŭte demandis:

— Rudristo?

La koro de Rjabov ekbatis pli rapide, sed li intence ekiris pli malrapide, trankvile leviĝis laŭ knarantaj ŝtupoj, riverencis kaj, ekrigardinte rekte en la konveksajn okulojn de la caro, diris laŭ la moro:

— Saluton, via sano, je ĉiuj kvar ventoj!

La caro, ne ridetinte, kapjesis:

— Nu, saluton!

Jozefo Baĵenin flustris al la caro:

— Nia unua en niaj lokoj rudristo. Kaj de bona familio, Siro, — ekde la praavoj la maristoj havas dokumenton, per kiu ilin gratifikis caro Ivano Baziljeviĉ...

Petro plu rigardis al Rjabov, al liaj larĝaj ŝultroj, al la fortika kolo, ligita per mikskolora tuko, al tuta lia proda aspekto, spiranta sanon kaj forton. Momenta rideto tuŝis la lipojn de la

caro.

— Ĉu en la Solovkiaj vi estis?

La rudristo respondis ne tuj — pretere sur la ponteto oni kun bruego estis ruliganta barelon, — ne distingis la demandon. Sekvantarano, elsaltinta el post la ŝultro de Jozefo Baĵenin, serveme klarigis:

— La Siro demandas vin, ĉu vi veturis al la Solovki-insuloj?

— Al Solovki', sinjoro, veturi ne eblas, — kun digno respondis Rjabov. — Veturi eblas en sledo, kaj en ĉaro, kaj en kaleŝo. Sed sur maro ne multe eblas veturi. Sur maro oni iras kaj ankoraŭ, se sub velo, — kuras. Kaj pri la Solovki-insuloj — do mi iradis al ili...

— Maristo! — kolere diris la caro al la sekvantarano. — Ĝis nun vi plu veturas!

La sekvantarano viŝis la lipojn per tuketo, depaŝis singarde, por ne trafi sub caran koleron.

— Vi estu ĉi tie! — ordonis la caro al Rjabov. — Vi restos sur tiu ĉi ŝipo. Pririgardu ĝin kun tuta atento: ĉu ĝi bonas, ĉu estas lerte konstruita, ĉu ĝi estos oportuna en mara vivo. Vi rudros, do vi ĝin konu. Iru labori!

Rjabov riverencis, deiris al la pli juna Baĵenin, kiu, kiel ĉiuj malbonaŭdantoj, havis iom timeman vizaĝesprimon, eĉ pli fortiĝintan nun pro proksimeco de la caro, la sekvantaro kaj pro ĉio, okazanta sur la Mosea insulo.

La pli junan Baĵenin-on — Teodoron Rjabov konis pli proksime kaj estimis pli multe, ol Jozefon: la okuloj de Teodoro rigardis milde, sur la vangoj brulis fajna, knabina, kiel

ĉe Metrio, ruĝo, li paroladis per mallaŭta, kvazaŭ trostreĉita tenoro kaj siajn grandajn manojn alpremadis ordinare al la kava brusto. Sed kun ĉio ĉi Teodoro estis tute ne timema homo, plurfoje li volonte iradis kun varoj — anstataŭ komizo — al malproksimaj ĉasejoj, scipovis uzi transmarajn navigaciajn instrumentojn kaj eĉ en la pasinta somero montris al Rjabov, kiel oni faru desegnaĵojn de ŝipoj.

Ili intersalutis, deiris pli malproksimen, trans barelojn kaj pakojn, faligitajn de sekvantaranoj. La suno staris jam alte, Dvino fluis malrapide, kviete, la nova jaĥto staris preskaŭ senmove sur la kvieta akvo. La rudristo, mallarĝigante la okulojn pro brilo de la akvo kaj la suno, demandis Baĵenin-on:

— Kio estas «Sankta Petro»? De kie oni ĝin venigis? Kie estis konstruita la jaĥto?

Teodoro, submetinte la orelon, redemandis, poste kapjesis, respondis ne sen fiero:

— Nia jaĥto, rudristo, en Vavĉugo konstruita, Dvina. Ĉion ni mem faris, neniu helpis.

Kaj li rakontis, ke la jaĥto estis konstruita de ŝipa majstro Timoteo Koĉnev. La avo de Timoteo, Jegoro, iam en la Peĉenga monaĥejo faradis barkojn por vendo. Tiujn boatojn norvegoj aĉetadis de la monaĥejo. La patro de Timoteo en la Solovkia konstruejo nemalmulte da trimastaj barkoj konstruis. En la familio de Koĉnev tiu arto estas delonga. Li kaj ankoraŭ Ivano Kononoviĉ Korelin grandajn barkojn por mara irado faras pli bone ol aliaj majstroj, ili ĉi tie estas la unuaj en sia arto.

— Tio estas vero! — konsentis Rjabov. — Mi mem sur iliaj

barkoj iradis, miradis...

De malproksime aŭdiĝis la potencema voĉo de la caro — la sekvantaranoj estis aranĝantaj ŝipan manovron. El post pakoj eliris Ievlev kun spado, en kaftano, demandis:

— Pri kio vi konversacias?

— Jen, mi aŭskultas, kiel ĉi jaĥto estis konstruita, — diris Rjabov.

— Kiel do ĝi okazis? Mi aŭskultus.

Teodoro komencis rakonti kun ĉiuj detaloj.

Oni konstruis la ŝipon je zorgo de la fratoj Baĵenin, por provo — ĉu ili sukcesos kun ŝipo novmaniera, senekzempla, kiajn en Blankmario oni neniam faris. Jozefo skribis al Moskvo, por ke oni sendu fremdlandajn ŝipkonstruistojn Nikols-on kaj Jan-on. Tiuj komencis prepariĝi por longa vojaĝo, sed tiom longe prepariĝadis, ke Jozefo vokis al si Koĉnev-on, konfirmis interkonsenton per manpremo — konstrui jaĥton. Timoteo mem faris desegnaĵojn, Ivano Kononoviĉ tiujn desegnaĵojn kontrolis, taksis aprobe. La ŝipon oni ekkonstruis. La laboristoj — ĉarpentistoj, kalfatristoj, forĝistoj — ĉiuj estas dvinanoj, la instrumentoj de nivelilo ĝis hakilo same estas niaj. Nikols kaj Jan venis printempe, longe ne kredis, ke la ŝipo estas konstruata de rusaj homoj sen fremdlandanoj, sed devis kredi...

La jaĥton oni konstruis, dekoraciis tute dece, por ĝojigi Petron Aleksejeviĉ-on, festis la lanĉon. En la festo ĉeestis ĉefepiskopo Arĥangelska kaj Ĥolmogora, — Atanazio, malgraŭ delonga malamikeco kun Jozefo, la jaĥton li laŭdis. Jozefo Andrejeviĉ diris, ke nun li komencos konstrui multajn

aliajn ŝipojn, Atanazio ankoraŭ laŭdis pro penemo.

Dum bapto oni nomis la ŝipon «Sankta Petro» — honore al Siro Petro Aleksejeviĉ. Tiel decidis Atanazio, kaj al Jozefo la nomo de la jaĥto tre plaĉis. Post la festo oni drinkis dum du tagoj kaj unu nokto je la komenco. Senhonoriĝis Jozefo en la tuta ĉirkaŭaĵo, — tia li estas homo, ne scias limojn en ĉio: nuda, kiel novnaskito, grimpis sur ĉevalon, ekrajdis. En picearo de Kurostrovo li falis, lia virĉevalo foriris hejmen. Jozefo direktis sin al la Supra urbeto, frapadis al domoj, plorpetadis:

— Oj, virinoj, karulinoj, elportu ajnan vestaĵon. Se iu elportos — mi edziĝos! Je Dio, edziĝos...

Rjabov, aŭskultante Teodoron, turnadis la kapon, ridadis:

— Jen olda diablo! Kaj ĉu ne malsaniĝis li post tiu nokto?

— Tute ne!

Teodoro estis rakontanta sen malaprobo, — kion postuli de li, se li tia naskiĝis...

— Ja ni eniru en la domon, manĝetu, — rekonsciiĝis Teodoro. — Vi, verŝajne, malsatas ĉi tie kun ŝtata nutrado. Ĉe ni ĉio estas rezervita, tute sufiĉos.

Manĝeti ili iris malsupren, en kameron, bunte kaj riĉe dekoraciitan per ĉizado kaj lazura drapo. Ĉi tie, sur benko, ĝis la gorĝo kovrita per kapra litkovrilo, estis dormetanta barbulo, nejuna aspekte, kun kalvaĵo, kun akra, kiel ĉe mortinto, nazo.

— Timoĉjo! — ekkriis Rjabov, nur ĵetinte rigardon al la dormanto. — Koĉnev!

— Ĝuste li! — respondis Teodoro. — Ĉu vi rememoris?

— Ja kiel mi povis ne rememori, se mi kun li sur Nigra

Luda dum preskaŭ kvardek tagoj nurajn kamemorberojn manĝadis, kaj al Dio preĝadis, kaj krucon starigadis. Okazis!

Kaj Rjabov, kaŭriĝinte apud la benko, kun karesa rideto komencis puŝi Timoĉjon, tiri lian barbon, ĝis tiu malfermis la profunde kaviĝintajn okulojn kaj suspiris.

— Ĉu vi ne rekonas? — demandis la rudristo.

Servisto alportis lignan bovlon kun Dvinaj flanoj, surverŝitaj per acidkremo, gadon en salakvo, varmegan farunan kaĉon, densan malhelan bieron en kruĉo. Ievlev eksidis al la tablo, Teodoro same kontraŭ li. Rjabov donis al Timoteo bieron en tornita ligna kruĉeto, demandis:

— Ĉu vi plu ne rekonas?

Tiu plu rigardadis, palpebrumante, poste diris:

— Malsanas mi, ne povas...

Li malsekigis la lipharojn en la biero kaj ree kuŝiĝis kun la vizaĝo al la muro. Rjabov, ne komprenante, ekrigardis al Teodoro. Tiu simple respondis:

— Mortos li baldaŭ. Lia internaĵo estas tute batita. Kiam tiun ĉi jaĥton oni komencis konstrui, oni batvundis lin per glitilo, transverse de la ventro la glitilo falis.

La rudristo morne eksidis al la tablo, verŝis por si bieron, demandis:

— Pro kia do diablo vi tenas lin sur la ŝipo?

— Ja Timoteo mem ordonis preni lin sur la jaĥton, eĉ se li estus tute mortanta. Kaj la animon de majstro necesas kompreni: li mem la ŝipon konstruis, ĝi tuta estas faro de liaj manoj. Li estus la unua ŝipmajstro en Rusujo, se li vivus pli.

Por tiu ĉi jaĥto li desegnaĵojn sur sablo per vergo faradis, kaj ĉiam revis pri ŝipo por oceana iro, centkanona, kun tri ferdekoj, — kvazaŭ oni ordonis al li, Timoteo, ĝin konstrui. Legi kaj skribi li scias malmulte, ciferojn scias strange: ion li tute ne aŭdis, sed ion bone komprenas; li ĉiam diradis al mi: «Kalkulu, Teodoro, ĉu eblas trunkojn enhaki tiele, se glitilon ni metos por la ŝipo tielan...»

Koĉnev ekĝemis sur sia benko, kun peno turniĝis de la muro. Sur la maldikiĝinta elturmentita vizaĝo estis rampantaj gutoj de ŝvito.

— Ĉu malbone, Timoteo? — demandis Teodoro. — Eble, popon voki?

— Sed mi, eble, ne mortos. Ne deziras mi morti kaj ne mortos! — diris Koĉnev. — Iru al diablo via popo...

Kaj li ree ĝemis.

— Ĉu vi ne rekonas min, majstro? — demandis Ievlev.

Koĉnev ne respondis — ekdormetis.

— Ankoraŭ reviviĝos Timoteo! — nelaŭte diris Rjabov. — Mi konas lian specon — fortikaj homoj. En akvo ili ne dronas, en fajro ne brulas...

— Kiel vi sukcesis kun tornaj laboroj? — demandis Ievlev. — La afero estas tre komplika...

— Ja la frato mem komencis torni, — respondis Teodoro. — Se en lian kapon ia ideo venas — ne eblas elpeli per ajna incenso. Mi tornos, diras, kaj fino. Mi, diras, estas homo de Dio dotita, kaj se mi deziras, neniu min haltigos. Alveturigis li en Vavĉugon tornan maŝinon, instalis transmision kaj ektornis.

Kiom li tornas — malsukcese. Gratvundiĝis li tuta, la manoj en sango, la okuloj sovaĝaj. Nu, troviĝis tiam al li ulo, nomata Ŝuljak. Tiu mem estas malforta, pilgrimanto — intencis iri al la Solovki-insuloj, sed la vojo estas longa, ne sufiĉis forto. Kaj Jozefo lin prenis. «Ĉu torni, demandas, vi scipovas?» — «Kial, — respondas la ulo, — kial ne povi? Povas. Tia estas nia afero ja — torni». Kaj Jozefo al li: «Ŝipajn blokojn vi tornos». La ulo, certe, blokojn neniam vidis. Tiam Timoteo ĵetiĝis helpi: tiele, diras, kaj tiele faru. Kaj la frato plu: «Se vi eltornos — mi vin riĉigos, se ne sukcesos — pendumos!»

Teodoro mallaŭte ekridis, kolektis de sur la tablotuko panerojn, ĵetis en la fenestron — por mevoj.

— Ektimis la ulo. Mi lin konsoladis longe. Do li trinkis akvon kaj komencis torni. Kaj eltornis.

— Ĉu ĉi tie estas la ulo? — demandis Ievlev.

— Ja kien li malaperos? Oni vestis lin per kaftano, donis botojn, ĉapon. Hieraŭ Petro Aleksejeviĉ kiam aŭdis pri tio, ekridis kaj diris — ŝipa timermano[51] Ŝuljak.

Mallarĝiginte la saĝajn okulojn, trinketante vinon, Teodoro ekparolis ree, kaj sub liaj maldensaj lanugaj lipharoj ekludis bonkora rideto.

— Mia fraĉjo, li, se pensi, kun sia besteco estas vera maliculo. Sed sen malico ĉu eblas ja rapidigi nian Dvinan landon? Cent jarojn rajdu — ne ĝisrajdos, muskoj, marĉo — unuvorte, tundro. Kularo ĝismorte pikas, lupoj are vagas. Kaj

---

51 El la nederlanda «timmerman» — ĉarpentisto; en Rusio en la 18–19 jarcentoj laŭ iniciato de Petro tio estis oficiala ŝipkonstruista rango en la floto (en 1826 tiu rango kun aliaj estis alinomita kiel «ŝipa inĝeniero»). *(trad.)*

de la maro vento blovas, blovas...

La esprimo de timideco subite malaperis de la vizaĝo de Teodoro, lia rigardo ekbrilis, la voĉo plifortiĝis.

— De la maro blovas, blovas! — diris li. — Ho, sinjoro, mi ne scias vian nomon. Blovas de la maro, vokas, logas ĝi, la maro. Jen tiun ĉi jaĥton ni konstruis, — eble, la unua provo estas fuŝa, sed ja la unua. Kaj laŭ ĝi videblas, ke ni kapablas verajn ŝipojn konstrui, kaj kun kanonoj. Se la maro ne estus nia, se niaj avoj al Grumanto ne iradus, se al ni cerboj ne sufiĉus, aŭ nia Blankmara popolo timus la maron... Sed ne, ne timema estas la pomoro, kuraĝa, forta kaj honesta — nenion li timas. Do iru sur mara vojo. Sed mankas ĝi — ni nur fiŝkaptas kaj ĉasas, dum al ni iradas fremdlandanoj sur siaj ŝipoj. Se vi rigardos — iĝos amare...

Teodoro enpensiĝis, apoginte la kapon per la manoj. Silvestro Petroviĉ malrapide trinkis bieron, same pensadis. Tiutempe supre tamburoj ekrulis alarmon. Ievlev leviĝis, post li ekiris Rjabov kun Teodoro.

Sub tamburado, sub hurlado de marŝaj klarionoj, sub kantado de fifroj caraj ludsoldatoj kun sekvantaranoj kaj kun korpulentaj bojaroj, grakante kaj sakrante, trenadis de sur la caraj ŝipoj sur ŝalupojn, barkojn kaj boatojn — kanonojn, malnovajn rustajn kolubropafilojn kaj haŭbizojn, liveritajn de la cara karavano laŭ akvo el Moskvo. En vergaj korboj oni trenadis blokojn, tornitajn pro la cara zorgo, barelojn kun pulvo — por la nova ŝipo, volvaĵojn da kabloj, pafilojn por la ŝipanaro. Petro, en ŝvito, kun kolere gaja esprimo de la rondaj konveksaj okuloj, garde, sur la ventro transportadis en barkon sakojn kun bronzaj lumiloj, ujojn kun bomboj — tre

multekostaj kaj danĝeraj por transŝarĝado. Neniu homo restis sen afero, almenaŭ vidate de la caro, — ĉiuj aŭ laboradis, aŭ ŝajnigadis, ke laboras. Eĉ maljuna Patriko Gordon ion puŝadis per la ŝultro kaj sakre minacadis.

Fine la ŝiparo, konsistanta el ŝalupoj, barkoj, boatoj, sub la komando de Gordon, kiun Petro respekte nomadis subadmiralo, direktis sin de la Mosea insulo al Solombalo[52]. Tie estis preparata por lanĉo ankoraŭ unu ŝipo...

Kaj vicadmiralo Buturlin, kaj subadmiralo Gordon, kaj admiralo Romodanovskij timetis akvon eĉ sur Dvino, kaj ĉiuj kriadis, ke soldatoj remu pli gardeme, ne hastu kaj ne balancu la ŝipojn.

Dum la vojo la granda ŝipestro Petro Aleksejeviĉ kaj Patriko Gordon sidis en ŝalupo sur la sama benko kaj, kvazaŭ du lernejanoj, foliumadis libron — kodon de ŝipaj signaloj. Petro trovadis, kiu signalo kion signifas, Gordon kapjesadis aŭ subite disputadis. Samloke ili komencis skribi siajn signalojn: unu kanonpafo de la admirala ŝipo — ĉiuj devas kunveni por matenmanĝo aŭ tagmanĝo; se la admiralo faras du pafojn, la superaj oficiroj devas sen prokrasto iri al sinjoro admiralo por konsilio; tri pafoj sur la admirala ŝipo signifas, ke la admiralo ĵetas ankron, — same devas fari ankaŭ la tuta floto. Pafado el ĉiuj kanonoj sur la flagŝipo estas signalo levi la ankrojn. Se nokte al iu ŝipo okazos malbono, tiam ĝi devas levi sur masto lumilon kaj fari unu kanonpafon.

Rjabov sidis sur la pobo, aŭskultadis, memorfiksadis, pensis: «Kvazaŭ infanetoj... Ĉio bonas, sed kie estas la floto?

---

52 Solombalo, aŭ Solombalaj insuloj — antaŭurbo (nun distrikto) de Arĥangelsko, situanta sur insuloj en la delto de Dvino. *(trad.)*

Stranguloj!»

Li turnis la kapon, kriis al la remantoj:

— Streĉe! Ek!

La remantoj streĉiĝis, la ŝalupo antaŭiĝis...

En Solombalo vojevodo Apraksin solene kondukis la caron kaj la sekvantaron al la preskaŭ finkonstruita ŝipo. Du malgrandaj kanonoj malakorde pafis saluton omaĝe al la caro, la eĥo disruliĝis super Dvino. Apud la ŝipo ĉe la ŝtuparo staris du fremdlandanoj en ledaj veŝtoj, broditaj per ruĝaj bidetoj, unu — kurbkrura, malalta, alia — korpulenta, grasa, kun tri mentonoj, ŝipaj majstroj — Nikols kaj Jan. La caro brakumis ilin, poste ĉirkaŭkuris la ŝipon, disĵetante per la piedoj orkolorajn lignerojn. Reveninte al la ŝtuparo, li dispuŝis la fremdlandanojn, grimpis sur la rapidaj piedoj supren kaj subite uhuis sur la supra ferdeko, kiel knabo. Ankoraŭ post malgranda tempo lia ruĝiĝinta vizaĝo glitis en kanontruo maldekstre, poste dekstre. Ekŝrikis fero — la caro provis riglilojn sur pordoj, ĉu ili bone fermas. Poste li ekkriis kolere — vokis supren Lefort-on, Teodoron Jurjeviĉ-on Romodanovskij-on, Ŝein-on, aliajn sekvantaranojn.

— Bonas la ŝipo ja! — diris Rjabov al maljuna ĉarpentisto, trankvile manĝetanta sur traboj. — Kiu konstruis?

— Nikols kaj Jan.

— De kie ili aperis?

— Sciate, de kie fremdlandano aperas. El trans la maro.

— Ĉu en la nuna somero?

— En la nuna somero ili en Moskvo estis.

— Kiam do ili sukcesis konstrui?

— Jen, fraĉjo, tio estas enigmo. Tia homo estas fremdlandano: kvankam li forestas, li ĉeestas, kvankam ne li faris, tamen rezultas, ke li. Unuvorte — sentaŭgulo.

Rjabov alsidiĝis al la maljunulo sur la trabojn. Tiu demandis, kapmontrinte la ŝipon, kiu staris sur la platformo, preskaŭ preta por surakvigo:

— Ĉu la caro estas tie?

— La caro.

— Ja mi aŭdas — iu bruas. Nu, se iu bruas, tiam tio estas la caro. Lia servo estas tia.

Ili sidis iom, silentis. De sur boatoj, ŝalupoj oni trenadis sur la konstruatan ŝipon kanonojn, pulvon en saketoj, tornitajn de la caro mem en Moskvo blokojn, teksitajn en la Tola korto same en Moskvo velajn tolaĵojn, kablojn, ŝpinitajn en la Ŝnura korto en la blankŝtona ĉefurbo.

— Jen, kiom da varo! — diris la ĉarpentisto. — Tiu ĉi ja pli grandas ol jaĥto! Vera ŝipo!

Li trinkis akvon el ĉerpilo, kaŝis la tranĉileton, per kiu li estis tranĉanta sian flanon, rakontis:

— Atendadis ni Nikols-on kaj Jan-on en la pasinta jaro — mankas la majstroj. Kaj ligno kuŝas — same atendas mastron, majstron. Bonegaj traboj, ĉiuj kiel perloj. Sur rivero Lajo hakitaj, vintre — estas nek kurbaĵo, nek putraĵo, nek ondaj fibroj. Tia ŝipa ligno, ke pli bone ne ekzistas. Mi rigardis, rigardadis — kuraĝiĝis, kaj iris al la vojevodo mem, al Teodoro Matejeviĉ. Tiele kaj tiele, mi diras, ĉu mi vojaĝu al Lodjmo kaj

konduku ĉi tien glorindan majstron Ivanon Kononoviĉ-on. Nia vojevodo tuta ektremis pro ĝojo. «Kolombo mia, diras, savu el malfeliĉo, diras, forestas Nikols kaj Jan, kaj la caro de mi postulas. Alveturigu Kononoviĉ-on, mi vin superŝutos per oro!» Nu, ekipiĝis mi mare, levis la velon kaj ekiris. Trovis Kononoviĉ-on. Ĉu vi vidas sablon tie?

— Kie?

— Jen tegmento super ĝi sur fostoj estas metita!

— Nu, mi vidas.

— Ĝuste ĉi tie ĝi naskiĝis, nia ŝipo. Glatigis Kononoviĉ ĉi sablon kaj komencis sur ĝi per sia bastoneto planon por la ŝipo fari. La larĝon de la ŝipo li prenis kiel trionon de la longo. Kaj la alton de la holdo — kiel duonon de la larĝo. Sur stango li noĉojn eltranĉis kaj kalkulis ripojn. Dum dek ses tagoj li kalkuladis. Li havas amikon, same majstron — Koĉnev li nomiĝas, jaĥton «Sankta Petro» konstruis, ne ĉi tie, sed pli malproksime, en Vavĉugo, ĉe Baĵenin. Do ili, karulo, ĉiam konsiliĝadis. Jen tiel provadis, jen ĉi tiel. Kaj Teodoro Baĵenin kun ili — helpadis... Kaj apud ilia sablo la vojevodo ordonis starigi gardistojn, soldatojn kun halebardoj, por ke neniu ion difektu. Li mem kun ili same dum ĉiuj tagoj estadis...

— Ĉu li komprenas ŝipkonstruadon? — demandis Rjabov.

— Iom, li estas viro kun kapo. Pli multe demandas: tio por vojevodo same estas bona afero — demandi. Nu, ŝablonojn ni faris, komenciĝis laboro: fornojn ni starigis akvajn kun kaldronoj — por tabulojn vaporizi. Vidu, kian ŝipon ni konstruis — tute glatan, pli bonan ol jaĥto, ĉu? Kiam ni per tabuloj tegis, tiam ni kvazaŭ haŭton surmetis — tiel molaj ili

estis. Faris ni preskaŭ ĉion, — ĝuste tiam aperis Nikols kaj Jan. Nu, sian metion ili scias, nenion eblas diri, sed la ŝipo ja estis preta. Ili tuj Ivanon Kononoviĉ-on preskaŭ per puŝoj forpelis, ni mem, diras, sukcesos, iru for, avo! Riverencis Ivano Kononoviĉ al la ŝipo per granda maniero, prenis sian bastonon, sian hakilon ŝovis sub la zonon, aranĝis sian ŝalupon, kaj — reen al Lodjmo...

— Kaj Nikols kaj Jan?

— Ĉi tie ili estas. Al ili estas respekto, al ili estas favoro, al ili estas salajro cara. Tiel ĉiam okazas: se vi diros, ke simpla ŝipkonstruisto el Lodjmo la ŝipon konstruis, — kiel oni al vi rigardos? Sed se vi diros, ke Nikols kaj Jan — tiam estos bone.

Rjabov suspiris, leviĝis:

— Kie do estas Ivano Kononoviĉ? Ĉu li eĉ la surakvigon ne vidos?

— Li diris, ke intencas iri hejmen, sed la veron mi ne scias. Eble, li rigardos la surakvigon elmalproksime. Ja li estas homo...

— Ĉu monon do al li la vojevodo donis?

— Monon donis, — sendezire respondis la maljunulo, — sed kio por li estas mono. Ofende estas al la majstro.

Rjabov ekiris al la ŝipo, leviĝis sur la ferdekon.

Petro Aleksejeviĉ estis skoldanta Apraksin-on, ke la ŝipo ankoraŭ ne pretas, la vojevodo pretekstadis: oni ne liveris najlojn, kaj blokojn prokrastis, kaj veltolon unue sendis ne tian, kia necesas. Majstroj Nikols kaj Jan same senkulpiĝadis — tre malbone laboras rusaj ĉarpentistoj, maldiligentaj, pli multe

parolas, ol faras. Apraksin subite koleriĝis, kriis al la fremdlandanoj:

— Vi prefere silentu, glorindaj sinjoroj! Kiom da tempo ni vin atendadis?

Nikols kaj Jan tuj ofendiĝis. Petro Aleksejeviĉ pacige demandis:

— Kiam do ni lanĉos?

— Post tri tagoj, ne pli frue! — respondis Teodoro Matejeviĉ. — Tre multo estas nefinfarita, granda ŝipestro. Kaj hodiaŭ sur la jaĥto eblas iradi. La tago estas serena, mara vento blovas...

Poste, trairante sur mezferdeko, Rjabov aŭdis, kiel Apraksin en kolero rakontas al Ievlev:

— Hieraŭ mi diras, ke Nikols kaj Jan preskaŭ nenion por la ŝipa konstruado fari sukcesis, — la granda ŝipestro ridas. Ne kredas...

Sur la konstruata ŝipo ili laboris ĝis la noktomezo kaj nur en profunda nokto, ne sentante la piedojn pro laco, direktis sin al la Mosea insulo. La caro sidis en la ŝalupo nemalproksime de Rjabov, rigardadis jen al Solombalo, kie staris sur la glitejo la ŝipo, jen al la Mosea insulo, kie estis kviete balanciĝanta ĉe la varfo la jaĥto «Sankta Petro».

— Du ankoraŭ estas malmulte! — diris Gordon. — Sed du jam estas bone... Du ankoraŭ ne estas floto, sed du estas preskaŭ eskadro.

4. Diversaj estas ventoj...

Ekde la mateno oni ne vidis la caron-ŝipestron, bojaroj — tiuj, kiuj estis pli riĉaj kaj pli altrangaj — foriris en la palacon, la ceteraj sekvantaranoj estis lunĉantaj sub suna varmo: tranĉadis fumaĵitan anseron, trinkadis el boteleto rondire. Unu, maldika, fleksinte la genuojn, apogis al ili la barbon, sendezire maĉadis pirogojn, triste rigardadis al la Dvina vasto. Alia, sidante apud li, nelaŭte diradis:

— Jen lando! Tiele ĝin kaj tiele. Trafis ni en sovaĝejon. Eĉ birdo kiel porko ŝrikas. Ho Dio!

La maldikulo kapjesadis, manĝadis sekan pirogon, insultadis per enuaj voĉoj.

Pli malproksime sidis ludsoldatoj, — Rjabov jam sciis, kiel ili aspektas: en kurtaj kaftanetoj, magraj, kun krudaj fortikaj vizaĝoj. Ili abrupte renversadis glasojn, flaradis pankruston, prijuĝadis lokajn Blankmarajn virinojn, ridegadis kiel henas virĉevaloj. Apud ili staris Apraksin — nealta, kombita alie, ol hieraŭ, — batadis per kano la krurumon de la brilanta altboto, rigardadis malproksimen, ensuĉadis per la maldikaj naztruoj la odoron de Dvino, la apenaŭ senteblan, sal-amaran spiron de la fora maro.

Ekvidinte Rjabov-on, li ion diris al la ludsoldatoj. Unu el ili, nigriĝinta sub suno, kvazaŭ trobakita, — poste la rudristo eksciis, ke lia nomo estas Jakimĉjo Voronin, — laŭte, raŭke kriis:

— Rudristo, ĉu vi vodkon drinkas?

— Rudristo, ĉu vi vodkon drinkas? — mokimitis maldika akuta voĉo.

Rjabov iom retiriĝis, ekrigardis sub la piedojn — ĉi tie estis turniĝanta malgranda maljunuleto en tintiloj, sonoradis, saltadis, lian nudan sulkan vizaĝon kurbigis grimaco, el la buŝo elstaris, kiel stumpo, unu kurba dento.

Retenante tremon de abomeno, la rudristo transpaŝis la nanon kaj tiam ekvidis alian bufonon: tiu sidis en rondo de ludsoldatoj, rigardis per rondaj malgajaj okuletoj, viŝadis la buŝon per sia ĉapo kun tintiloj.

— Venu, drinku vodkon! — diris Jakimĉjo Voronin. — Via vojevodo Apraksin jen rakontas, ke vi ĉi tie estas la unua maristo. Sidiĝu, estu gasto!

Li moviĝis sur la trabo, donante lokon apud si. La aliaj same ŝoviĝis, kaj Rjabov tuj rimarkis, ke ili ŝoviĝis kun estimo, ne sen scivolemo rigardante lin. Nur Apraksin estis staranta kiel antaŭe, ne ŝanĝante la pozon, rigardadis al Dvino.

— Saluton, — eldiris Rjabov kaj akceptis el la manoj de Jakimĉjo pezan, ĝis la randoj plenigitan glason. — Kaj koncerne de tio, kia mi estas maristo, do kontraŭ kelkaj aliaj mi eĉ eliri ne rajtas. Mi antaŭ ili estas kiel ĥaradrio.

— Kio estas ĥaradrio? — demandis Voronin, pikante per tranĉilo pecon da ŝinko kaj etendante ĝin al Rjabov.

Rjabov akceptis la viandon, diris emfaze:

— Ĥaradrio, sinjoro — tiel en nia, marista lingvaĵo, nomiĝas mevo, — malgranda, timema. Ĝi mem nenion kaptas, timas preni akiraĵon, sed emas preni tion, kio estas forĵetita, nenecesa: tripon, ekzemple, kiam fiŝisto sentripigas fiŝon, aŭ ankoraŭ ion. Do ni inter ni knabetojn, kiuj kun ni en la maron iradas, tiel nomas — ĥaradrioj. Ilia parto estas preskaŭ nenia,

— kion la fiŝistoj ne prenas, tio por ili taŭgas. Lernantoj, unuvorte. Inter ni do ni diras en nia maniero: jen ĥaradrio.

Li trarigardis al lumo la flavvitran glason, flaris kaj, sub krucaj rigardoj de la ludsoldatoj, tra la dentoj enverŝis en gorĝon la malvarman juniperan vodkon. Poste elspiris la aeron kaj delikate demordis peceton da ŝinko.

— Ĉu bonas la ŝipo do? — demandis alia ludsoldato kun gaja efelidhava vizaĝo kaj kun fortikaj sukoplenaj lipoj. — Por via maro taŭgas la ŝipo? «Sankta Petro»?

— Ŝipo via nemalbonas, — respondis Rjabov, — iom seleca, se de ĉi tie rigardi, — jen la pobo azendorse elstaras. Sed cetere nemalbonas. Ja Baĵenin Jozefo estas viro kun kapo, se li ion entreprenas — do, estos rezulto. Nun li pri ŝipoj interesiĝis, sed antaŭe ja li pri tiu afero neniom okupiĝis. Muelisto li estas, grenon mueladis. Kaj tabulojn faradis por vendo. Riĉega ulo.

— Kaj kiaj ĉe vi ĉi tie estas ventoj? — demandis Voronin.

— Ventoj ĉi tie estas, ni ne plendas, — respondis Rjabov, strabante al la nano, kiu laŭte ekŝmacis, prisuĉante grasan oston. — Diversaj estas, sinjoro, ventoj. Nia maro Blanka, ĝi je ventoj riĉas...

Kaj li komencis paroli pri ventoj, montrante per la mano kun la malplena glaso, kiel ili blovas, de kie venas kaj kiajn necesas levi velojn kun lokaj ventoj. Aliris Ievlev en kaftano, malbutonita sur la brusto. Apraksin iomete kliniĝis — same aŭskultis.

— Kiam aŭgusto venas, — estis diranta Rjabov, — ni do tiel, en nia marista maniero, inter ni pensas: atendu fiŝisto

venton folifalon, — ĝi blovos longe, polvos, hurlos en la maro la folifalo. Vento, kiu de ĉi tie blovas, plie aŭtune — ne tute el la nordo, sed el ĉi tie, — Rjabov per la glaso montris, el kie ĝi blovas, — ĉiam ĝi ĉe ni, sur nia lando Blankmara, estas kun pluvo. Ni nomas ĝin ploremulo, ĉar ĝi ĉiam ploras, larmas. Kaj tiel rezultas — ploremulo...

— Nu, sinjoroj maristoj? — demandis Apraksin. — Kiu tuj respondos, de kie en nia lingvaĵo, navigista, blovas la ploremulo? Ne diru, Ievlev, atendu, kara! Ĉu vi scias, Prjaniŝnikov?

Alta ludsoldato en kamizolo sen kaftano, kun malĝoja mieno, levis la ŝultrojn. Voronin estis sulkiganta la frunton kaj palpebrumanta. La aliaj forturniĝis.

— Sud-eosto, — diris Apraksin, — ĉu ĝuste, Silvestro? La sud-eostan venton la pomoroj nomas ploremulo.

— Ŝajne tiel ankaŭ holandanoj diris, — konsentis Rjabov.

— Kaj kiajn ankoraŭ ventojn vi havas, blankmaranoj? — demandis Apraksin, kaj ree en esprimo de lia vizaĝo estis neniom da moko, sed nur viva scivolemo lumis en la okuloj.

Rjabov ekrakontis plu pri ventoj. La ludsoldatoj en kaftanoj, en pluvmanteloj, iuj nudpiedaj, por ke ripozu la piedoj, iuj eĉ sen kamizolo, por ke priblovu venteto, — aŭskultis atente.

— Kaj ĉu la kompason vi scias? — el malproksime demandis Ievlev.

Rjabov respondis:

— Fiŝistoj inter si tiel diras: en maro nadlo pli utilas ol najlo...

Ievlev aliris pli proksime, diris:

— En iuj fremdlandaj libroj plej famaj viroj skribis, kvazaŭ en viaj nordaj landoj oni ververe vidis kinocefalojn — monstrojn kun hundaj kapoj, kaj ankaŭ arimasojn — ankoraŭ pli terurajn monstrojn kun unu okulo meze de la frunto...

La rudristo kviete ridetis.

— Ĉu vi aŭdis ion pri tio? — demandis Ievlev.

— Mensogaĵoj tio estas! — respondis Rjabov. — Kaj al Matko mi iradis, kaj sur Grumanto estis, kaj en Kolgujevo mi ĉasis — vidis nek kun hundaj kapoj, nek kun unu okulo. Urson, eble, tiu fremdulo via, sinjoro, ektimis, kaj pro la timo mensogis...

Al Apraksin aliris sekvantarano, ion flustris en la orelon, Teodoro Matejeviĉ retrorigardis:

— La ŝipestro venas. Sed vi ne ĝeniĝu, parolu plu, li ne ŝatas, ke antaŭ li oni tro timidu...

— Ja ni pri timido ne estas instruitaj! — respondis Rjabov.

Neniu el la ludsoldatoj ŝanĝis sian pozon, ili restis kiel ili sidis antaŭe. Petro Aleksejeviĉ aliris, metis la manojn sur la ŝultrojn de Apraksin kaj Ievlev, enŝoviĝis inter ili, ekaŭskultis la konversacion. Rjabov sidis flanke al la caro, rakontadis, kiel sidiĝas nebulo en la maron, kiel leviĝas nuboj de la horizonto, kiel pura sereno aperas kaj kiel oni povas juĝi, ĉu baldaŭ falos vento.

— Kio, kio? — redemandis la ŝipestro.

— Li pri maraj antaŭsignoj diras, — klarigis Apraksin, — aŭskultu, Siro.

— Do, flankeniĝu, Teodoro, — diris la ŝipestro al Prjaniŝnikov kaj eksidis apud li. — Ja pli flankeniĝu, ĉu vi algluiĝis?

— Ni ankoraŭ en nia maniero tiel pensas, — estis diranta Rjabov, — de la avoj tio venas: se blankbaleno, marhundo aŭ orko elakviĝas, kaj la muzelon turnas, kaj spiras, — atendu venton de tie, kien ili turniĝas. Forta estos vento, eĉ eble toroko batos.

— Kia toroko? — demandis Petro.

— Sciate, toroko, — respondis Rjabov kaj rekte ekrigardis al la sunbruna, tute juna larĝa vizaĝo de la caro, — vento mallonga, Siro, kiu ĉian ŝnuron ŝiras, rompas ĉion, se ĝin ne atendi anticipe.

— Ĉu skualo? — demandis Petro.

— Kiu scias, — eldiris Rjabov, — ni nomas ĝin toroko.

Kaj, urĝata per demandoj jen de Apraksin, jen de Ievlev, jen de Voronin, jen de la caro mem, li ekrakontis, kion li sciis pri la Blanka maro, — pri ventoj kaj fluoj, pri flusoj kaj malflusoj, pri vojo al Solovkio, al Grumanto, al Ponojo, pri tio, kiel li iradis kun la forpasinta patro al fremdaj landoj, kiel iradis supren al Rusujo.

Ĉirkaŭe staris granda homamaso: kaj afabla Lefort, kaj ruĝvizaĝa princo Romodanovskij, kaj Ŝein, kaj Golicin, kaj aliaj. Ili aŭskultadis, kapjesadis, oĥadis, sed Rjabov sentis — ilin ĉio ĉi ne interesas, sed interesas nur kelkajn homojn: jen Apraksin-on, Ievlev-on, Voronin-on, la Siron mem. Petro tuta vigliĝis, liaj okuloj brilis, li sidis malkviete kaj ĉiam levadis la kapon, demandadis kaj redemandadis, laŭte ridadis kaj tiam

ĉiuj ridis ĉirkaŭe... Kaj tuj kiam li ĉesadis, ĉiuj ĉesadis, kaj ĉies vizaĝoj iĝadis enuaj, dum Petro plu atente kaj streĉite aŭskultadis.

Poste li prenis botelon, verŝis en glason, etendis al Rjabov, diris:

— Drinku!

Kaj, larĝe paŝante, foriris sur la jaĥton. Rjabov eltrinkis la donacitan vodkon, viŝis la buŝon, leviĝis. Sur la jaĥto oni ekbatis tamburon, komence unu, poste duan.

— Ĉu alarmo? — fiksaŭskultis Apraksin.

Ekhurlis klarionoj, la du tamburoj tondris per ruladoj, Apraksin kriis laŭte, gaje:

— Alarmo!

Kaj ekkuris, subtenante la spadon. Post li, devancante lin, ekkuris Ievlev, ekŝrikis la nanoj, la unudentulo kaptis la restintan ŝinkon, ekkuris same, ŝovante ĝin en la sinon. De ĉie kuris sekvantaranoj kun timigitaj vizaĝoj: ili timis ne la alarmon — por ili terura estis kolero de Petro Aleksejeviĉ, se tiu rimarkos eĉ etan malfruon. Kuris Romodanovskij, Ŝein, peze krablante sur la mallongaj kruroj; kiel kuglo pafiĝis kuracisto Van der Gulst; svingante la irbastonon, finmanĝante dum kurado, peze paŝis sur la tabuloj popo Bazilo, la cara pastro: se oni tamburas alarmon, ankaŭ al li ne estas indulgo; dumaa sekretario Zotov, puŝante, trakuris antaŭ Vinius; dumaano Ĉemodanov stumblis je nano Hermoĉjo, falis sur la tabulojn, vundinte la kapon.

Kaj la tamburoj plu tondris, la klarionoj plu ludis, kaj en la hela palblua Dvina ĉielo kun krioj flugadis mevoj, kvazaŭ

timigitaj de la nekutima bruo kaj de la nevidita tumulto.

— Ĉu tie estas incendio? — demandis Demĉjo, aperante renkonten al Rjabov.

— Ĉu eblas ilin kompreni? — respondis la rudristo. — Ĉe ili petolo ne pli bonas ol incendio. Prenu jen, manĝu fumaĵon, mi jam tute satiĝis... Kaj plu sidu ĉi tie, en malvarmeto, mi iros rigardi...

Li suriris sur la jaĥton de la pobo, levis sin sur la manoj kaj elrigardis el post kargo. Ĉiuj sekvantaranoj amasiĝis en gregon; antaŭ ili plu estis batantaj la altajn tamburojn du tamburistoj. Trumpetisto Tomaso Ĉigirin, blovpufiginte la vangojn, levinte al la ĉielo latunan klarionon, estis trumpetanta per ĉiuj fortoj. Kaj caro Petro Aleksejeviĉ, kuntirinte la brovojn, paŝadis sur siaj longaj kruroj, ne rigardadis al la homoj. Poste, forsvinginte Ĉigirin-on, li komencis kolere riproĉi iun malaltan maljunulon. La maljunulo estis fervore ĵuranta per Dio, kaj estis nekompreneble, kion li ĵuras. Petro, ne aŭskultante lin, stamfis, turniĝis al Jozefo Baĵenin kaj laŭte, por la tuta ŝipo, kriis:

— Kaj vin kie serĉi? Se ni alarmon batas, tiam ankaŭ vi kuru, alie mi tuj vin pelos for...

5. Unua saluto

Oni komencis alligi haŭseron de la barko. Ŝvitaj viroj senorde kriadis malsupre, insultadis. Petro staris sur la ŝipnazo mem, transfleksiĝinte malsupren, ordonadis, kion necesas fari. Sed la lokaj pomoroj ne estis komprenantaj, kion diradis la caro jen en la nederlanda, jen en la rusa. Rjabov eliris el sia kaŝejo, preteriris la bojarojn kaj princojn, kiuj plu senmove staris sur la ferdeko sub ardaj sunradioj, leviĝis laŭ ŝtupoj kaj,

facile deŝovinte la caron flanken, laŭte, kvazaŭ per paroltubo, kriis al la viroj sur la barko:

— He, laboruloj! Min aŭskultu: mi en nia, Blankmara maniero diros, eble vi komprenos. Per la ŝipvosto iru ĉiuj!

La viroj komprenis, ekkondukis la barkon ronde, Rjabov estis iranta laŭlonge de la ŝipflanko.

— Ĵetu nun! — kriis li, kiam la barko batiĝis per la pobo. — Kaj la remistojn pli firme sidigu, por svingi ne estas loko, necesas remi.

Ievlev kun Voronin kaj Teĉjo Prjanišnikov penis malstreĉi la haŭserojn, per kiuj la jaĥto teniĝis ĉe la bordo, sed ili same nenion sukcesis: la ĉi-tieaj pomoroj ĉion faradis alie, ol la holandaj instruistoj sur la PleŝĉejevaLago.

Petro ĵetiĝadis jen tien, jen ĉi tien. Prjanišnikov premvundis sian manon, ŝrikis, Voronin senhelpe insulte respondadis al la caro:

— Treni haŭseron! Ĉu eblas, se ĝi premfiksiĝis!

Denove aperis Baĵenin, post li iris kelkaj hirtaj viroj, nekombitaj — evidente, ili estis dormintaj, malgraŭ la cara alarmo. Unu — pli alta ol la ceteraj — aliris al Ievlev, deŝovis lin, diris per dorma voĉo:

— Iru vi, sinjoro, ien for!

La ceteraj sen speciala lerteco, sed ankaŭ sen ajna peno eltrenis la eskalon. La viro — nudpieda, kun kapo, ĉirkaŭligita per ĉifono, — desaltis sur la albordiĝejon, streĉiĝis, elbatis per ŝtipo la bastonon, kiu estis tredita en la haŭseron, kriis:

— Sur la barko! Tiru!

La jaĥto facile balanciĝis, inter ĝia flanko kaj la albordiĝejo fariĝis mallarĝa akva strio, poste la strio iĝis pli larĝa, poste ankoraŭ pli larĝa. La nanoj ekfalruliĝis:

— Ni ekiris, ektreniĝis, ŝipistoj, ni dro-o-onos!

Bojaroj, kiuj estis pli kalvaj, pli barbaj, komencis krucosigni sin. Rjabov subridis: jen sendis Dio maristojn, — estos malfeliĉo kun ili. Kaj kial la caro ilin kun si trenas, por kio li ilin bezonas?

Poste li subite koleriĝis: vidis li en la vivo ĉiajn stultulojn, sed tiajn ne vidis. Kien ili iras — ili ne scias, kial ili urĝe, laŭ tamburo, sen kristana moro ekiris, neniu scias, kiu estas estro por tiu ĉi ŝipo — ĉu eblas kompreni? Kaj Metrion li stulte sur la bordo lasis...

Kaj kiuj estas la matrosoj? Vera maristo Koĉnev — tiu estas mortanta. Baĵenin plenan jaĥton da siaj servutuloj venigis, kiaj ja en Vavĉugo estas pomoroj — nura rido. Sendis Dio la caron iri en la maron. Kaj tiuj ĉi, kiel virkaproj, staras, la barbojn svingas, la tutan supron inundis — eblas nek trairi, nek turniĝi. Kiele do estos levadi velojn kaj ĉiajn ŝnurojn regi, se en la maron la ŝipo eliros ? Kaj se la maro komencos bati? Ĉu la bojaroj tiele plu staros kiel fostoj sur la ferdeko? La maro ilin ĉiujn forlavos, neniu revenos hejmen viva.

Aliris Petro — ŝvita, al la humida frunto algluiĝis malhela hartufo, demandis:

— Kiele ĝi iras?

— Ja kiel ĝi povas iri, — kolere eldiris Rjabov. — Nura amuzo, Siro. Nura ridindaĵo. Kaj sur ĝi la ĉefo estas vi, ĉu?

Petro Aleksejeviĉ deŝovis la malsekan hartufon de la frunto,

suspekteme ekrigardis:

— Nu, mi.

— Se vi, tiam ordonu forigi la bojarojn kaj princojn de la supro. Tie sube estas ĉambro kun benkoj, — kiel decas. Ili tie sidu kaj la barbojn skuu anstataŭ ĉi tie vagi. Kaj antaŭ ĉio diru, kien la ŝipon konduki. Jen vin ĉiuj timas demandi, neniu homo scias — kien ni nin direktas. Ĉu al Solovkio?

Petro abrupte turniĝis, foriris, laŭte kriis al la sekvantaranoj. Tiuj, timigite strabante, unu post la alia ekiris malsupren. Supre restis Lefort kun Romodanoskij, Vinius, ambaŭ bufonoj, kiuj skrape truis bastosakon kun fumaĵita fiŝo kaj estis ŝovantaj ĝin en la poŝojn kaj en la sinojn, kaj ludsoldatoj kun Ievlev kaj Apraksin. Tuj iĝis pli mallaŭte, pli glate, pli trankvile. La Vavĉugaj ĉarpentistoj kaj lignaĵistoj, nomumitaj nun matrosoj, ekstaris al siaj lokoj, la tamburistoj kun la trumpetisto iradis post la granda ŝipestro — atendis, kiam tiu ordonos tamburi vican alarmon.

La jaĥto treniĝis malrapide, knarante.

Ree ekbatis la tamburoj. La caro enkuris laŭ la ŝtupoj supren, kriis, ke oni hisu la velojn. Kiujn — neniu sciis, la tamburoj estis tondrantaj, la trumpetisto Tomaso ruĝiĝis pro streĉo, la caro estis ion krianta en la paroltubon, Apraksin alkuris al li, interparolis, komencis komandi mem. La Vavĉugaj ĉarpentistoj, nelaŭte interkverelante kun la ludsoldatoj, iel-tiel levis la velojn. Facila vento ekplaŭdis en la larĝaj grizaj toloj.

Rjabov ekkondukis la ŝipon laŭ Dvino malsupren.

Petro Aleksejeviĉ staris proksime, je du paŝoj. Liaj okuloj

brilis per ĝoja ekscitiĝo, li frapadis Lefort-on al la dorso, kriadis:

— Jen ĝi! Kio? Vidu, vidu, jen!

Li senĉese komandadis kaj ne donadis grandan atenton al tio, ke lin neniu obeas, ofte kaptadis sian mallongan lornon, rigardadis al la kompaso en ujo kaj al ĉiuj montradis, ke ili rigardu — kien ni iras, kian ni tenas kurson, kaj ĉu rapide, kaj kia estas vento.

Lefort estis ridanta, sed lia rigardo estis malplena, senbrila.

Jozefo Andrejeviĉ same staris ĉi tie, gratadis la barbon, enmiksiĝadis en la carajn parolojn, almontradis per la fingro:

— Jen ĝi, Siro, Kurjo, vidu, fluas. Dometo ĉi tie estas, inoj kiel pura sateno, kaj karesaj, kaj tiklemaj, pff!

Kaj li dense ridis.

Kaj la caro ne aŭskultis, jam komandadis sian ŝatatan kanonan manovron, mem trenadis kanonon sur ŝnuregoj, ordonadis, kiel kaj kien pafi, kiom ŝtopi da pulvo, kiel labori per puŝilo. Nun ĉiuj ludsoldatoj havis en la manoj levstangegojn — por ruli kanonojn, ŝovilojn — por enŝovi kuglegojn, ŝtopileltirilojn. Meĉoj jam estis bruletantaj en brilantaj sub la suno meĉobastonoj, kiam la caro, jam multan fojon, enkuris supren. Svingante la paroltubon kaj superstreĉante la voĉon, li kriis al la kanona servistaro kaj al ĉiuj turnitaj al li sunbrunaj junaj gajaj vizaĝoj:

— Aŭskultu mian komandon! Sinjoro kanonestro, pretiĝu al pafado! Bombardistoj kaj kanonistoj — al siaj lokoj! Babordo, meĉojn fajrigi! Babordo! Enŝovu ŝargon! Babordo!

La ludsoldatoj ĵetiĝadis, trenante pulvon, disŝutante ĝin, svingante apud la pulvo bruletantajn meĉojn. Ĉio tuj povus ekbruli, la jaĥto eksplodus, sed Dio favoris al Petro Aleksejeviĉ, ne punis pro konfuzeco, pro nescipovo, pro juneco. Kaj ne punis eĉ tiam, kiam el trans la verda Dvina terkapeto subite aperis barko, kaj la caro tiun barkon ne rimarkis kaj ordonis al la ludsoldatoj: «Salve pafu!» La ludsoldatoj ŝovis meĉojn al fuzeoj, du kanonoj el la ses tondre pafis, la kuglegoj kun fajfo faris arkan movon kaj falegis nemalproksime de la barko, levinte fostetojn de ŝaŭma akvo. Rjabov tiris la kubuton de la caro, sed tiu jam mem vidis kaj la barkon kaj la levitan sur ĝi standardon de la ĉefepiskopo de Vago kaj Ĥolmogoro, kaj tion, kiel sur la barko oni ekkuris kaj eksvingis flagon...

Sed la kanonistoj ĉe siaj kanonoj ne vidis la barkon, ili estis okupitaj, — la pulvo en fuzeoj ne ekbruladis. Kun kolera eksciteco ili plu ŝovadis brulantajn meĉojn, kaj finfine post multaj penoj pafis ankoraŭ unu — la tria — kanono, kaj la kvara nur snufis, el la trunko batis mallarĝa fajrolango. La nanoj kuŝiĝis sur la ferdekon, kovris per la manoj la kapojn, ekhurlis. Petro stamfis, kraĉis.

Kun terura tondro, jam tute sennecese, ĉu eksplodis, ĉu pafis la kvina kanono. La ludsoldatoj falis apud ĝi. Trans sakoj, trans bareloj ĵetiĝis tien Apraksin, rigardi — ĉu vunditaj aŭ plene mortigitaj estas la homoj.

Apud la sesa, sentime fosante en la fuzeo per najlo, staris Ievlev, rigardis — ĉu tie brulas aŭ tute ne ekbrulis, kaj kion fari kun ĝi, — eble, verŝi akvon?

— Teodoro Matejeviĉ, — kriis Petro, — ĉu iu estis

mortigita? La kuraciston voku, li esploros!

Sed neniu estis mortigita nek vundita, nur unu havis brulvundon de la kolo kaj la vango. Van der Gulst, kun timemo rigardante al la fumanta kanono, ĉe kiu estis komandanta Ievlev, verŝis sur ĉifonon brunan fetoran eliksiron kaj komencis kuraci la kanoniston. Romodanovskij pro la pafado verdiĝis, viŝadis ŝviton per la dika mano, suspiradis. Buturlin estis ete movanta la piedojn, vestitajn en ruĝan marokenon, paŝadis sur la ferdeko, kun subrido ĵetante rigardojn al la caro.

Venis barba, dika dumaa sekretario Vinius, kun riproĉo diris:

— Petro Aleksejeviĉ, pro tiu ĉi pafado sube ĉe la bojaroj la kovraĵo falis, ligneroj ŝutiĝis. Ĉu decas?

— Decas, decas, — kolere respondis la caro, — mi pensas, ili toleros. Iru for de ĉi tie, iru!

Kaj kriis poste kun gaja minaco:

— Eĉ plie estos!

Li ekridegis, ekiris malsupren — renkonti la ĉefepiskopon de Vago kaj Ĥolmogoro Atanazion: la barko jam estis aliranta al la ŝipflanko.

Benante la ŝipon kaj la homojn, Atanazio donis al la caro ordinarajn donacojn — panon kaj fiŝon, subridante, demandis:

— Kial vi, cara moŝto, pafadon al mia barko aranĝis?

Kaj ekiris post la caro supren, al la rudrorado — rigardi la kompason, admiri ĉirkaŭajn vidaĵojn per lorno, observi la kanonan amuzon.

— Kiam do al Solovkio? — demandis li, rigardante kun

intereso tra la lorno.

— Mi dume atendos, — respondis la caro kaj levis la paroltubon — krii al la tribordo, ke tiu prepariĝu al pafado.

— Kaj mi al Firso jam antaŭlonge skribis, — diris Atanazio, mallarĝigante unu okulon kaj celante la lornon al malproksima muelejo. — Vidu, vidu, — kriis li subite, — kampulo el muelejo eliris. Kvazaŭ sur la manplato ĉio videblas. Kaj kion li faras, senhontulo, — kun ridema riproĉo malrapide ekparolis la ĉefepiskopo, — se li scius, kiu al li rigardas. Aj, krudulo!

Post la pafado de la tribordo ili dum longa tempo ankriĝadis *vertuiing*[53], faradis velan alarmon, rezulte de kiu Voronin falis en Dvinon kaj satglutis akvon. Ankoraŭ ili pafadis el la prua kanono, kvazaŭ atingante malamikan ŝipon. La prua kanono pafis tute bone, nur unu afero estis malbona, ke ne estis, kiun atingi.

Tiutempe la vetero estis malboniĝanta, la ĉielo, post la varmega mateno, kovriĝis per nuboj, Dvino malbriliĝis, vualiĝis per hulo. Sed la sufokeco ne ĉesis, spiri plu estis malfacile, la Vavĉugaj kampuloj, nomumitaj matrosoj, moviĝadis pigre, per anasa iro, kiel ĉiuj nordanoj en varmego...

Rjabov ĵetadis rigardojn al la ĉielo, oscedadis. La jaĥto moviĝis malrapide, vento jen plenigadis la velojn, jen subite malaperadis tute, kaj tiam la grizaj toloj enue faladis, la ŝipo balanciĝadis surloke.

Subite, kiam ili jam fore malsupreniĝis, abrupte ekblovis malvarma mara vento. Petro Aleksejeviĉ ekĝojis, ordonis tamburi ankoraŭ unu alarmon, fari turnon, iri supren. Supren ili

53 Duankre *(nederlande)*, maniero ankri inter du ankroj *(trad.)*.

ekkuris vigle, la caro mem metis la manojn sur la rudroradon, tiradis la krispan kapon, ŝercadis kun la kampulaspekta ruza Atanazio, komandadis ŝanĝadon de veloj.

Rjabov ekdeziris trinki: montrinte al la caro, kiel iri laŭ la ŝanelo, li dekuris suben — serĉi kvason.

Ĉie sub la ferdeko angoris la sekvantaranoj, iuj dormis, iuj nur dormetis. Romodanovskij estis sidanta sur mallarĝa benko senŝua, kolera, movadis la ŝvelintajn piedfingrojn, trinketadis medon, forblovante la ŝaŭmon. Dumaa sekretario Zotov, kuntirante la larĝajn brovojn, estis skribanta sur pergameno. Ĉi tien for de la kanonpafado kaŝiĝis ankaŭ la nanoj — Hermolajo kun Timoteo. La unudentulo estis maĉanta, Timĉjo estis fadenflikanta sian infanan kaftaneton, suspiradis, flustradis ion preĝan.

Kiam Rjabov supreniris al sia loko, la ĉielo tute kovriĝis per nuboj, vento portis pluverojn, vipadis la dorsojn. Sur la vangoj de la caro pro la subita malvarmo aperis grizaj makuloj, sed li ne butonadis la kaftanon, frotadis la malpurajn manojn, ridadis:

— Kie do estas Jozefo Andrejevič? Drinkis, eble, mem kaj pri la gastoj forgesis. Li vodkon alportu, hunda filo. Atanazio frostiĝis!

Li fordonis al Rjabov la kondukadon de la jaĥto, drinkis mem vodkon, regalis ĉiujn vice, denove prenis la lornon. Ili ree trairis Kurjon, Solombalon. En vualo de pluvo aperis Keg-insulo, siluetoj de eksterlandaj ŝipoj, la dekstra bordo kun sonorilturoj, kun la Komerca Korto, kun la alta domo de la vojevodo. Vento kun facileco estis pelanta la jaĥton, la mastoj knaradis, malantaŭ la ŝipo tiris sin blanka ŝaŭma spuro.

— Pli proksime konduku al la fremdlandanoj! — ordonis Petro.

Rjabov kapjesis: se pli proksime, do pli proksime, tuj vi vidos, kia estas rudristo Ivano filo de Sabateo. Li turnis la rudron, ankoraŭfoje turnis, ankoraŭ. La ŝipo kliniĝis, la mara vento kun hurlo batis al la veloj, la karmina pobo de «Sankta Aŭgusteno» — la antaŭnelonga eskortŝipo — komencis kreski, proksimiĝi, kvazaŭ moviĝis ne la jaĥto, sed estis iranta al ĝi la nederlanda eskortanto.

Same kiel antaŭe, oni batis sonorilojn, tondris unuopa pistola pafo. Petro subite alkroĉiĝis al la fortika ŝultro de Jozefo Andrejeviĉ, direktis la brulantan rigardon al la standardo kun la rusia blazono, flirtanta sur la ĉefmasto, insultis:

— Malgrandan standardon oni pendigis, — se mi mem ne observos, oni nenion bone faros...

Kaj, malpacience tirante Baĵenin-on, li kriis, ke kanonistoj kuru al la prua kanono, se necesos respondi al pafsalutoj de fremdlandaj ŝipistoj.

Rjabov ankoraŭfoje turnis la rudron. La jaĥto tute kliniĝis. Baĵenin ojis — tute proksime, apude glitis la flanko de «Sankta Aŭgusteno», preterflugis perpleksaj vizaĝoj de nederlandanoj, kupraj trunkoj de kanonoj, la signalisto ĉe la sonorilo sur la posteno.

Petro Aleksejeviĉ kunpremis la makzelojn, sur la vizaĝo de la caro ruliĝis grandaj pluveroj.

— Malgrandas la standardo, malgrandas, ne vidas ili la rusian blazonon...

— Sed eble, ne deziras vidi? — demandis Apraksin.

Petro ne respondis. Rjabov estis kondukanta la jaĥton al alia ŝipo, — tio estis «Matura frukto». Tie oni estis egalmezure, laŭte batantaj timpanon, la fortaj batoj malproksime disaŭdiĝis sur akvo.

Rjabov koleris: eble, li kulpas, ke oni ne vidas la standardon, eble li malproksime kondukas la jaĥton? Tiam li pli proksime kondukos. Tiam ili vidos!

— Kvaroble pli granda standardo necesas, por ke ili vidu, — kolere diris Prjaniŝnikov.

Apraksin subridis, ne turniĝante al la samnomulo, respondis:

— Floto necesas, forto mara, tiam ili eĉ la plej malgrandan standardon distingos. Ni konstruos ŝipkonstruejojn, komencos ŝipojn surakvigi — ajnan standardon ili vidos...

Ĝuste en tiu momento mem sur «Sankta Aŭgusteno» malfrue batis kanono. La caro tremeris, liaj okuloj larĝe malfermiĝis. Li brakumis Baĵenin-on, diris kun forto:

— Ili ekvidis! Nu, dankon al vi, Jozefo Andrejeviĉ. Mi por ĉiam ne forgesos. Ili ekvidis, komprenis...

La kanono batis duan fojon, trian, kvaran. Sur la fremdlandaj ŝipoj oni ektrumpetis, transdonante signalojn, pafado aŭdiĝis de «Matura frukto», kiun ili ankoraŭ ne atingis, poste ektondris salutoj de «Amora ĝojo», de «Ora nubo», «Blanka cigno»... Pezaj, tondrantaj, fortaj ruladoj estis disirantaj malsupre super la akvo, jen kune, jen dise, maldekstre, malantaŭe, antaŭe, dekstre...

Petro Aleksejeviĉ tute paliĝis, la nazotruoj de lia mallonga

nazo pufiĝis, li tiradis Baĵenin-on je la ŝultro, kriadis, superante per la voĉo la kanonan tondradon:

— La rusan ŝipon ili pafsalutas! La unuan ŝipon! La plej unuan! La standardon, kiun ni levis sur la ĉefmasto, ili salutas!..

Kaj, impetinte antaŭen, li kuris al la prua kanono, mem prenis pulvon, ŝutis du mezurojn, kaptis de la kanonisto puŝilon, komencis enpuŝi, alte levante la ŝultrojn, enrigardante en la trunkon. Oni donis al li ŝtopilon, li insultis, postulis alian, per malfirmaj manoj enŝutis la pulvon en la fuzeon, misforminte la vizaĝon, alportis meĉon.

En la fuzeo io snufis, krakis kaj estingiĝis.

— Pulvon! — kriis Petro Aleksejeviĉ. — Pulvon, hundaj filoj, sekan pulvon! Ŝargu alian kanonon! Pereigis vi, stultuloj, malhonorigis, la pulvo estas malseka, humidigis la pulvon, kanajloj!

Apraksin, kliniĝinte super la kesto, transfleksiĝinte internen, estis fosanta, serĉante pulvon pli sekan. Ievlev jam estis enŝovanta ŝargon en alian kanonon, Prjanišnikov — en la trian. Kaj ĉiuj havis palajn vizaĝojn, ĉiuj komprenis la signifon de la nuna minuto. Necesas respondi la salutadon al la ŝtata blazono!

Kaj sur Dvino plu staris senfina tondrado, oni pafadis el ĉiuj flankoj, en humideco sentiĝis pulva brulodoro, acida odoro de sulfuro.

Finfine la pulvo en la fuzeo ekbrulis, tondris pafo, la kanono retiriĝis, faliginte Apraksin-on, sed li ekstaris gaja, feliĉa. La caro subite kisis lin kaj, plu insultante, ĵetiĝis al la alia kanono. Pafis ankaŭ la alia de la tribordo, tiu, pri kiu oni pensis, ke ĝi

krevis. Pli pafi ne necesis, al kvar pafoj de la eskorto kaj al ses de la aliaj negocistaj ŝipoj sufiĉis pafi du fojojn por la caraj kanonoj.

En fajfo de la marvento, en oblikva pluvo flugis «Sankta Petro» sur grizaj Dvinaj ondoj, jen kuŝiĝante per la flanko, jen rektiĝante, jen saltante sur ondon, flugis preter eskortuloj, preter koleraj kupraj kanonoj, elstarantaj el paftruoj, preter negocistaj ŝipoj. Kaj la malgranda standardo de «Sankta Petro» kun la blazono rusia, forte streĉita de la vento, fiere, venke, gaje kuris ĉiam antaŭen kaj antaŭen...

En la sama tempo sur la pruferdeko, malantaŭ pakoj kaj bareloj, forgesita de ĉiuj, penis leviĝi sur sia mato kaj ekvidi tion, kion vidis ĉiuj, Timoteo Koĉnev, la konstruinto de «Sankta Petro». Per la malfortiĝantaj manoj li kaptadis la barelon kaj finfine kaptis kun tia alkroĉemo, ke levis la kripligitan korpon kaj per la brusto surfalis sur la barelfundon. Nun li vidis, kiel iris la jaĥto, vidis super la kapo, sur la masto, kiun li mem starigis, la standardon, vidis sur Dvino blankajn rondajn fumojn de kanonaj salutoj...

— Brave! — diris Timoteo kaj ridetis, ne rimarkante, ke el liaj okuloj rampas larmoj. — Brave, glate ni iras!

Li deziris ordoni, ke oni aldonu ankoraŭ da veloj, ĉar neniu pli bone ol li konis tiun ĉi jaĥton, sed homoj apude ne estis. Li denove malfortiĝis, ne povis teni sin je la barelfundo, derampis reen sur sian maton kaj denove senkonsciiĝis por longe, ĝis ekvidis super si la caran kuraciston Van der Gulst-on, Rjabov-on, Ievlev-on, Ĉemodanov-on kaj Apraksin-on...

Ĉapitro sepa

> Li sciis en sciencoj matrosaj tre forte, pri maroj, kie estas insuloj kaj profundaĵoj, kaj malprofundaĵoj, kaj rapidfluoj, kaj ventoj.
>
> *Historio pri rusia matroso*[54]

1. Demĉjo Borisov

Demĉjo akompanis la jaĥton per la okuloj, rigardis, kiel ĝi kvazaŭ degelis, tirata de la barko en brilo de riveraj strioj, ĝisatendis, kiam la ŝipo iĝis nigra punkteto, tiris sin kaj iris en ombron — atendi sian rudriston, kiel li atendadis lin multfoje dum sia ankoraŭ ne longa vivo.

Manĝon li havis, se li ekdezirus trinki — trinkus el Dvino, de la insulo lin neniu estis pelanta, kaj nun finfine liberiĝis tempo, kiam eblis kviete kuŝi kaj pensi, kiel li vivu plu, kio okazis dum la antaŭnelongaj, eventoriĉaj tagoj kaj kion li atendu de la estonteco.

Eblis ĉion pripensi kaj samtempe eblis rigardi, kiel vivas la cara palaco sen la caro, kia ĉi tie estas ordo, kio okazas en la kuirejo. Eblis aŭskulti kantojn, kiujn kantas caraj servistoj, venintaj kun li el la fora blankŝtona Moskvo, kaj ĉefe — eblis satdormi, li jam sufiĉe dormadis duone, vekiĝante pro ĉiu susuro. Ĉi tie estis trankvile. Ĉi tien ne povas veni monaĥejaj

---

54 «Historio pri rusia matroso Bazilo Koriotskij kaj pri bela reĝidino Heraklia de la Florenca tero» — unu el la plej antikvaj rusaj aventur-kortezamaj romanoj, kreita en la tempo de Petro I. La aŭtoro estas nekonata. *(trad.)*

servantoj, ili ne havas aferojn ĉi tie, kaj des pli ne havas kialojn esti ĉi tie patro ekonomo de tiu monaĥejo, kien antaŭ multaj jaroj estis vote fordonita Demĉjo Borisov, alnomata Goroĵanin[55]. Ne havas ĉi tie aferojn Agafoniko, ne kaptos li Demĉjon, ne sendos lin kiel interpretiston al fremdlandaj ŝipoj, tien, kie dum ĉiu navigado li perlaboradis monon por la monaĥejo, tradukante ordonojn de ŝipestro al ŝarĝistoj...

Sub mallaŭta, apenaŭ aŭdebla plaŭdado de la Dvinaj akvoj, sub ŝrikaj krioj de mevoj, sub flustro de betuloj Demĉjo fermis la okulojn, tiris sin kaj, instalinte sin sur la sablo pli oportune, komencis revi pri tio, kiel aranĝiĝos lia plua vivo kune kun la rudristo.

Kun forto, klareco kaj difiniteco de revo, kio okazas nur en adoleska aĝo, Demĉjo imagis al si ne nur la rudriston ĉe la rudro de la ŝipo, sed ankaŭ sin mem kondukanta la jaĥton ĝuste tiam, kiam batas subita kaj feroca skualo el trans grizaj rokoj, kovritaj de likeno, kiam kun fajfo, kun hurlo leviĝas krutaj ondoj, por forviŝi, dispremi, frakasi tute la ŝipon, sur kiu la caro faras sian vojaĝon.

Kaj ĝuste en tiu ĉi momento Demĉjo staras ĉe la rudro. Al liaj brusto kaj vizaĝo batas ŝaŭmo, ŝprucoj, salo de la Blanka maro, — tion li plurfoje spertis, fiŝante, kun timemo, espero kaj fido rigardante al la vizaĝo de la rudristo. Nun li mem estas rudristo. Rjabov, certe, estas samtie, kie do li povus esti alie,

55 «Goroĵanin» en la rusa signifas «urbano». Tiu persono reale ekzistis en la historio, sed mencioj pri li en la dokumentoj estas malsamaj, kaj Borisov povas esti kiel familinomo, tiel ankaŭ patronomo (nun ni dirus «Borisoviĉ», t. e. «filo de Boriso»), kaj Goroĵanin povas esti kiel familinomo (kiun oni ne traduku), tiel ankaŭ kromnomo (t. e. «Urbano»). Tial mi intence tradukis ambigue, same kiel en la originalo. *(trad.)*

sed li estas kvazaŭ en nebulo, kvazaŭ li estas, kaj samtempe ne estas, kaj la ĉefa, la plej grava ĉi tie estas Demĉjo, simila al Rjabov kiel ĝemelo. Ne mizera monaĥeja servanto, ne denaska kriplulo — Demĉjo Goroĵanin, sed alia Demĉjo — alta, grandŝultra, kun rekta rigardo de la heligitaj de la maro okuloj, kun blondaj bukloj ĝis la ŝultroj, kun tondra voĉo, pro kiu stuporiĝas ĉio, kio estas viva sur la ŝipo, — ĝuste li estas Demĉjo Borisov, ĝuste li estas Goroĵanin.

Li savas la ŝipon. Li per sia tondra voĉo faras ordonojn, kiel farus ilin Rjabov, li sentime rigardas al la furioziĝinta maro, kiel rigardus Rjabov, li trankvile starigas la ŝipon kun pruo kontraŭ la ondo, kaj li eĉ trovas en si fortojn por ŝerci, kiel ŝercus Rjabov.

Kaj la caro, tiu altega homo en pluvmantelo, staras apud li kaj ĉiam demandas, ĉu ni dronos aŭ ne?

Sed la firma mano de Demĉjo kaj la Dia volo savas la ŝipon. Batas tamburoj, tondras muziko, la suno bruligas varmege, sonoras sonoriloj, kaj rajdistoj retenas la petolemajn ĉevalojn, kiam la maristoj elŝipiĝas ĉi tie sur la Mosea insulo kaj kiam Demĉjo Borisov, rudristo, la unua surpaŝas larĝan tapiŝon, sternitan de la jaĥto ĝis la cara palaco. La caro ie perdiĝis, kaj Demĉjo iras, kaj ial li havas orkoloran barbon, li glatumas tiun barbon kaj malrapide paŝadas, kaj la popolo ĉirkaŭe — metiistoj kaj ŝarĝistoj, kaj fuĝintaj popoj, kaj Vavĉugaj kampuloj-matrosoj — ĉiuj krias, kvazaŭ mevoj:

— Rekompencon al li, rekompencon!

Kaj oni portas al li rekompencon, sed tuj iuj malklaraj vizaĝoj aperas antaŭ li, forprenas la rekompencon, kaj li rezistas, ŝrikas...

Demĉjo vekiĝas, malrapide komprenas: tio estis sonĝo. Kaj nun venis realo.

Liaj manoj estas ligitaj malantaŭ la dorso, neelteneble doloras la ŝultro, preskaŭ tordita en la artiko, en la okuloj glitas brilo de la akvo, la suna lumo.

Oni turnas kaj puŝas lin. Puŝas ankoraŭ, kaj tiam li vidas patron ekonomon. Agafoniko sidas sur renversita korbo — en tiaj fratoj-bakistoj portas el bakejo aromajn panojn, — sidas kaj viŝas per ĉifoneto sian rozkoloran maljunulan puran vizaĝon, tutan en sulkoj kaj faltoj. Al li estas varmege.

Du novicoj — sataj, fortikegaj, kun dormemaj vizaĝoj — staras maldekstre kaj dekstre de patro ekonomo.

— Do, ĉu vi sukcese fuĝis?

La okuloj de la ekonomo brulas per furiozo. Li bone memoras, kion li ricevis de la aroganta Rjabov tiam, post «Ora nubo».

— Latrono! Krimulo!

Demĉjo silentas.

Patro ekonomo koleras: la caraj servistoj nenion oferis al la monaĥejo, sed kiel penadis kaj patro prioro kaj patro ekonomo, kiel kribradis farunon por cara konsumo, kiel faradis fermentaĵon, kiel fornojn ardigadis, por liveri al la cara tablo panojn malpezajn, lanugajn, gajajn.

Ekde la pratempo monaĥejan zorgon oni pagadis de la caro per malavaraj kontribuoj, sed hodiaŭ kio? Eliris el la kuirejo ŝvita ulo sen krucosigni la frunton, sen peti benon, abrupte tiris al si la korbon, elfaligis la panojn sur krudtolon, tiris la alian

korbon kaj bojis al la frataro:

— Kial vi la buŝojn dismalfermis? Ĉu mi sola portu?

Kun humileco, interne insultante per laikaj vortoj, ili transportis la panojn — ĉiu pano havis krucon, ĉiu estis benita de la prioro mem. En la antaŭaj tempoj por la panoj estus donita ne malpli ol ora kovraĵo por ikono de Sankta Nikolao, sed nun oni eĉ ne demandu: razitaj muzeloj, kun negocistaj pipoj en la dentoj, Antikristaj idoj, ne alie...

— Iru en la ŝalupon!

Demĉjon oni puŝis ankoraŭfoje.

La konata malamata monaĥeja ŝalupo kun kupra kruco sur la masto estis knaretanta ĉe la albordiĝejo. La novicoj akceptis patron ekonomon preskaŭ sur la manojn, ĵetis suben la pankorbojn, forpuŝiĝis per hokstango.

Demĉjo sidis, ferminte la okulojn, por nenion vidi, silentis, pensis: «Se vento nun alflugus, tempesto, la ŝalupo renversiĝus, ĉiuj dronus. Tiel bone! Mi venus antaŭ Dion, dirus: „Kial, Sinjoro, monaĥoj viaj estas viaj servantoj, sed tiel malpie vivas, turmentantoj!“ Ĉion mi rakontus, nenion kaŝus. Kaj kiel ili kun ratoj en karceron ĵetas, salitan gadon manĝigas, kaj poste akvon ne donas, dormi ordonas sur ŝtona planko malseka. „Ĉu vi vere tiel instruis?“ Koleriĝus, eble, la caro ĉiela, ili scius, kiele estas ofendi orfon!»

Kaj denove Demĉjo komencis imagi precize kaj klare, kiel koleriĝus la caro ĉiela, kiel li stamfus, krius al patro ekonomo, kiel rekompencus lin, Demĉjon, kaj kiel Rjabov, eksciinte pri ĉio, ridus, turnadus la kapon, laŭdus:

— Aj, Metrio! Aj, bravulo! Aj, knabo!

Sed ankoraŭ nenio el tio okazis. Dvino estis kviete rulanta siajn akvojn. Demĉjo sidis ligita sur la varmega peĉita fundo de la ŝalupo. Barnabo nazvoĉe, el la interno mem, per la ventro estis kantetanta psalmon, patro ekonomo, kuntirinte la brovojn, estis rigardanta for.

Kaj ankaŭ en la monaĥejo mem nenio ŝanĝiĝis: same varmiĝadis la frataro sub sunaj radioj, same venadis el malfermita kelo odoro de salita fiŝo, same, kiel printempe, kiam Demĉjo fuĝis el la monaĥejo, patro pordegisto estis dormetanta apud la pordego.

— Ĉu kaptis? — indiferente lispis li, pririgardante Demetrion. — Nun vi ne fuĝos, ne.

En la korto la frataro ĉirkaŭis lin kaj Barnabon. Kapto de fuĝinta votulo — junulo, kiun fordonis la gepatroj en la monaĥejon kiel servanton pro voto, — estas ne ĉiutaga afero, evento tie, kie la vivo malriĉas je eventoj.

Barnabo, kontenta pro tio, ke li povis rakonti, kie kaj kiel ili trovis Metrion, staris apud li, mensogadis ĉion, kio venadis en la kapon. La frataro estis riproĉe zumanta, pririgardanta la laikan veston de Metrio, lian batvunditan vizaĝon, hipokrite suspiradis, aŭskultante, kiel ili trovis lin nemalproksime de la cara domo sur la Mosea insulo, kien ili veturigis panon por la cara tablo, kvazaŭ Demĉjo kuŝaĉis tie, ebriiĝinte per vodko, la okulojn ne povis malfermi, aroganta, batema, sen ajna humileco...

— Nun ni la rudriston atingos, — diris Barnabo, venke ĉirkaŭrigardante la frataron, — ne timos la latronon, ribelulon, dimalplaĉulon. Li estas la kaŭzo de ĉiuj niaj malfeliĉoj. De li ĉio komenciĝis...

Demĉjo levis la rigardon.

«Kio komenciĝis? Kio okazis en la monaĥejo dum tiu ĉi tempo?»

Nur nun rimarkis li gardiston kun batalhakilo kaj du monaĥojn, pasumantajn apud la enirejo de la monaĥeja malliberejo, — Filoteon kaj Kornelion — ambaŭ kun halebardoj.

— Iru! — ordonis Barnabo.

Demĉjo ekiris. La monaĥoj, interflustrante, rigardis post li. Filoteo kaj Kornelio disiris, ŝlosilo grincis en la seruro, el la kelo venis odoro de humideco. En la antaŭĉambreto estis fulganta lumileto el foka graso. Poste estis mallume.

— Iru! — kriis Barnabo, kaj eĥo resonis lian voĉon.

Li bruligis kandelon de la lumilo, kovris la flirtantan flamon per la dika mano kaj ekpaŝis sur ŝmacanta akvo. Post la dua turno estis ankoraŭ ŝlosita pordo. Barnabo malŝlosis ankaŭ ĝin kaj, forte batinte Demĉjon per la genuo, ŝlosis post li...

— Kiun diabloj alportis? — demandis el la mallumo raŭka voĉo.

— Mi tio estas! — nelaŭte respondis Demĉjo, ĝojante al homa voĉo. — Mi, Goroĵanin.

— Ĉu oni vin kaptis?

— Kaptis.

— Kaj la rudriston?

— La rudriston nun ne eblas atingi per mano, — respondis Demĉjo. — Ivano Sabateiĉ nun ĉe la caro mem iĝis rudristo...

En la mallumo alia voĉo gaje sakris. Nun Demĉjo rekonis subite ĉiujn: tio estis monaĥejaj servantoj — fiŝistoj, rudristoj kaj ĉasistoj, per kies laboroj nutradis sin kaj grasiĝadis la Nikola-Korela monaĥejo. Ĉi tie estis suferantaj: avo Teodoro, la unua en Blankmario ĉasisto je foko, je rosmaro; estis liaj amikoj fiŝistoj — Ĥagajo kaj Semisadov; estis rudristoj Jakobo kaj Moseo, Longinov kaj Kopilov; estis la monaĥeja lardofandisto Ĉernicin. Ĉiuj ili ĉirkaŭis Demĉjon, pridemandadis, ĉiuj interrompante unu la alian mem rakontadis kaj miradis: ĉu vere kaj li, kaj Rjabov nenion scias pri la monaĥejaj okazintaĵoj...

Demĉjo ĵuris je Dio, ke ili eĉ ne aŭdis. Avo Teodoro, kriinte al la aliaj, komencis rakonti ĉion laŭorde. Komenciĝis tio baldaŭ post kiam Rjabov kun Goroĵanin el la monaĥejo foriris: Agafoniko kaj la prioro en kolero entute ekpremis la servantojn, pro la rjabova ŝalupo oni de ili ĉion postulis, eĉ de lardofandistoj, de ĉiuj ĝis la lasta servantoj, kaj kion iu ŝparis per ĉasado aŭ fiŝado — prenis kiel garantiaĵon. Okazis grandega disputo kun Agafoniko, la ekonomo avon Teodoron per apogbastono batis, la avo la malhonoron ne toleris — iomete respondis. Agafoniko kriis «helpon!» La monaĥoj surfalis sur la servantojn, ĉiujn ligis kaj — en la kelon. Jen do ili sidas ĉi tie, dum kiom da tempo — neniu eĉ scias, la monaĥoj manĝigas intence en malsama tempo, por ke ne eblu diveni — ĉu jaro pasis, aŭ pli, aŭ multe malpli.

— Do, jen tiel ni sidas! — diris Semisadov. — Atendas. Sed kion? Putrigos ili nin ĉi tie, verŝajne...

Al lardofandisto Ĉernicin ŝvelis la piedoj, Ĥagajo sendentiĝis, Jakobo kun avo Teodoro ankoraŭ subridadis, sed

ne tro gaje. Nun la tutan esperon ili metis sur Rjabov-on. Se li serĉos sian Metrion — trovos ankaŭ ilin. Kaj se ne serĉos — pereos ĉiuj.

— Ĉu ĉi tie iu iam ĝismorte pereis? — demandis Demĉjo.

— Ĉu vi pensas, ke ne? Jegorĉjo dum dek unu jaroj sidis, kun la piedoj antaŭen foriris[56]. Multaj okazoj estis...

Interrompante unu la alian, ili rememoradis servantojn, enkarcerigitajn porvive: kvasiston Akimon, forĝiston Lukianon, ĉiziston Nilon...

— Kaj la ĉiziston pro kio? — demandis Demĉjo.

— Pro dubo! — diris Ĥagajo.

— Pro kia tia dubo?

— Kontraŭ Dio li ekdubis...

— Ĉu kontraŭ Dio?

— Kaj vi jen aŭskultu...

Sed elaŭskulti Demĉjo ne sukcesis. Barnabo kun kandelo venis por li kaj kondukis lin al patro prioro, kie jam sidis la ekonomo kaj kie staris odoro de storaka oleo, de sekaj herboj kaj de raspita gado kun rafano — manĝaĵo, kiun patro prioro tre favoris.

Demĉjo riverencis, ekstaris ĉe la pordo.

La prioro, ne rigardante al li, per glata voĉo klarigis, kia sorto atendas la neobeulon, se tiu ne konfesos siajn pekojn. Minacis, ke Demĉjon vivan ronĝos vermoj, ke en humideco kaj malvarmo de la monaĥeja karcero ne postvivos li la venontan

56 Metaforo de morto: oni lin elportis kun la piedoj antaŭen *(trad.)*.

vintron, ke nur pento povas savi la ankoraŭ junan vivon.

Demĉjo silentis.

— Diru!

— Mi ne scias, kion diri, patro!

— Ĉu instigadis Ivaĉjo Rjabov servantojn al malobeo?

— Ne instigadis!

— Kie nun estas tiu Ivaĉjo?

— Sur la cara ŝipo.

— Kion li faras?

— Kiel rudristo!

La prioro kaj la ekonomo interrigardis.

Poste patro prioro alŝovis al si lignan bovlon kun la raspita fiŝo, komencis manĝi, ŝmacante. Eĉ en duonmallumo de la kelo estis videble, kiel moviĝas liaj makzeloj, li estis maĉanta per la gingivoj — dentojn li malhavis tute.

— Por kio vi fuĝis?

Demĉjo silentis, mallevinte la okulojn.

— Parolu, junulo! — kun minaco eldiris la ekonomo.

Per obtuza voĉo Demĉjo respondis, ke la jaroj, por kiuj fordonis lin la patro kaj la patrino en la monaĥejon, jam antaŭ longe pasis, ke li deziras al libero, la monaĥejo al li ne plaĉas, prefere li vivu kiel simpla fiŝisto, mara laborulo, ol suferu ĉi tie. Parolis li ne arogante, sed rekte, ne laŭte, sed firme, kaj liaj nigraj grandaj okuloj, kadritaj per pintarkaj okulharoj, kuraĝe rigardis en la malbrilajn maljunulajn pupilojn de la prioro.

— Aroganta! — diris la prioro.

— Dimalplaĉulo! — konsentis la ekonomo. — De la rudristo ekzemplon prenas!

Demĉjo silentis.

— Kriplulo, sed fiŝisto deziras iĝi, — lispis la prioro. — Vi eĉ kiel logaĵisto ne taŭgos, frenezulo. Mortos vi, neniu eĉ entombigos, kiel bruta kadavraĵo en paŝtejo vi putros. Ĉu tion la patro kaj la patrino deziris por sia infaneto? Kun kiu vi ligiĝis? Kun latrono, rabisto, drinkemulo fiega, kiun ekzekuta ŝtupo ĉiutage atendas.

— Malveron vi parolas, patro! — obtuze diris Demĉjo.

— Kio?

Demetrio ripetis. Kaj aldonis:

— Ne latrono li estas kaj ne rabisto, sed la plej unua rudristo, kaj kun li mi ĉien iros, kien ajn li vokos. Kaj en la monaĥejo mi, patro, ne havas aferojn. En monaĥojn vi min ne logos, kiel servanto mi jam mian servon plenumis. Kaj ke mi de la monaĥejo sur fremdlandaj ŝipoj interpretas kaj pro tio al la monaĥejo iras profito, do ne estos tio plu... Ne bezonas mi interpreti, mi iĝos ŝipisto, maristo...

La prioro deŝovis de si la bovlon, lia malgranda vizaĝo kun elstarantaj oreloj ŝrumpis kiel pugneto, la maldensa barbo hirte elstariĝis antaŭen. Estis tia silento, ke iĝis aŭdeble, kiel en la libero, trans la dika muro, ektamburis pluvo, eksusuris vento.

— Ŝipisto? Maristo? Vi? Sed kie vi tiujn ŝipojn vidis? Kiu vin tie, favulon, bezonas? Lama kriplulo, eĉ sur la tero apenaŭ rampas, elpensis iĝi maristo? Ankoraŭ serĉu riĉulon, kiu farus

vin fiŝisto, fiŝon tranĉi — eĉ por tio vi ne taŭgas. Sed li jen kion elpensis.

Kaj, frapinte la tabloplaton per la sekiĝinta pugneto kun ŝvelintaj, kiel ŝnuroj, maljunulaj vejnoj, patro prioro ordonis tuj malliberigi Demetrion per granda mallibero, sen elirigo por preĝo, sen pano kaj akvo.

— Kun sala gado li tuj subfosajn pensojn forlasos, — kriis li, — kun sala gado la racio revenos, forgesos li la rudriston, ekpreĝos. Kompatante la orfecon ni lin tenas, sed li sian muzelon forturnas. Malbonas ni por li, patro Agafoniko, ne necesaj iĝis.

— Riverencu, — nelaŭte diris patro ekonomo, — danku.

Demĉjo staris senmove.

— Arogantega! — kriis la prioro kaj leviĝis de la tablo tiel, ke la tablo balanciĝis. — Sed ni eĉ ne tiajn rompadis. Rompos ankaŭ tiun ĉi dimalplaĉulon! En sangaj larmoj li sin lavos, per favo kovriĝos, skabio lin turmentos, tiam li rememoros Dion, damnito!

— Riverencu, danku, — per fajfanta flustro diris la ekonomo kaj puŝis Demĉjon de malantaŭe.

Sed Demetrio retenis sin sur la malsanaj kruroj, kaptis la pordofoston, diris:

— Vi min ne rompos!

El liaj brulantaj okuloj subite ŝprucis larmoj, kaj tute mallaŭte li ripetis:

— Ne rompos! Per favo mi kovriĝos, sed vi ne rompos. Mi mortos, sed vi ne rompos. Ne rompos!

La forta mano de patro ekonomo batis lin al la vango. Li balanciĝis kaj denove tute mallaŭte, apenaŭ aŭdeble ripetis:

— Ne rompos!

Oni batis lin ree. El la nazo ekfluis sango, li ekkriis, forŝiriĝante el la manoj de servisto kaj aliaj alkurintaj monaĥoj, ĵetiĝante antaŭen, al la prioro:

— Ne rompos vi, nigraj korvoj, ne rompos!

Poste li perdis konscion, kaj kiam oni kondukis lin tra la korto de la monaĥejo, por malliberigi per granda mallibero, liaj okuloj plu brulis per humila forto, kaj li iris mem, sen subteno, kvankam malfortiĝis ĝis tio, ke lia kapo turniĝis...

Nemalproksime de la perono de la monaĥeja preĝejo Demĉjo subite kaj abrupte haltis kaj levis la kapon. En la egalmezura susurado de pluvo li ekaŭdis kanonajn pafojn — unue unu, poste duan, poste ankoraŭ unu. Tio estis pafantaj sur Dvino ŝipoj, kaj la pafoj gaje tondradis super la akvo, ruliĝante, resoniĝadis eĥe, denove tondradis ĉiam pli proksime, ĉiam pli laŭte. Kaj estis simile, ke ili pafas ne vane, sed pafas por tio, ke al Demetrio iĝu pli facile en tiuj malfacilaj por li horoj.

— Ĉu mi longe vin atendos? — kriis Barnabo.

Li pasigis lin preter la servistoj kaj puŝis solan en fetoran malsekan truon — por granda mallibero. En lumo de la kandelo, kun kiu kondukis lin ĉi tien la monaĥeja prizonisto, li sukcesis ĉirkaŭrigardi: ŝtona planko, ŝmacanta per akvo, duonputrintaj lignotabuloj, sur kiuj putras pajlo, ŝtono anstataŭ tablo.

Ree frapfermiĝis la pordo, bruis la peza riglilo. Barnabo foriris.

En plena mallumo de la granda mallibero ĉio ŝajnis al la okulo velura, senmova, rigidiĝinta por ĉiam. Neniaj sonoj estis venantaj ĉi tien — nek fajfo de vento, nek malrapidaj paŝoj de monaĥoj, nek kantado de psalmoj. La obskuro estis tiel densa kaj intensa en la ŝtona sako sub la tero, ke la okuloj neniam alkutimiĝadis ĝin, kaj eĉ la manon estis terure etendi antaŭ si kaj movetiĝi same estis terure, por ne rompi la pezan, premantan, tomban kvieton.

Post malgranda tempo da vivado en mallibero la malliberuloj ĉesadis observi fluon de tago kaj nokto. Ĉio miksiĝadis al ili, la interna vivo okupadis tro grandan lokon, vizioj de pasinteco svarmis en la kapo, la imago, plifortigita per eterna obskuro, per terura silento de neekzisto, per soifo, malsato, kreadis bildojn sovaĝajn, kripligitajn, kvazaŭ reflektitajn en distordaj speguloj. Malliberuloj grave ekmalsanadis.

Demetrio vidis tiajn — kun tremantaj manoj, kun okuloj, larmantaj pro lumo, kun esprimo de eterna teruro sur la grizaj vizaĝoj. Ili vivis, kiel talpoj, en kavoj, elfositaj apud la muro, preskaŭ ne eliradis el tie, timante ĉion, de ĉiu homo atendante malbonon, elrampadis nokte, teruraj, en forputrintaj ĉifonaĵoj, perdinte ajnan homan aspekton.

Aliajn la mallibero venkadis tuj, en la plej mallongaj horoj. Pretaj ĉion forkonfesi, ili malbenadis sin, perfidadis ĉion, pri kio oni ilin demandadis kaj ne demandadis; nomadis kunkulpuloj homojn, kiuj en nenio kulpis; rigardante en iliajn okulojn, rakontadis pri iliaj neekzistantaj agoj. Timo de obskuro, muteco, malsato transformadis tiajn malliberulojn en monstrajn krimulojn.

Tiajn oni pentopunadis; ili postvivadis, revenadis al la frataro, aŭ al la servantoj, aŭ en foran monaĥejeton. Tiaj ĝis la morto konservadis en la vizaĝo flatemon, vivadis senkuraĝe, kun timo, denuncadis, kiam povis, kredis, ke la malantaŭa perono estas malpli kruta...

Demĉjo kunpremis la polmojn, fermis la okulojn, por ne pensi pri la granda mallibero, devigis sin pensi pri maro, pri ŝipoj, pri tio, kio estis ĉiam facile, feliĉe kaj simple revata.

Metinte la batitan vizaĝon sur la manojn, kunpreminte la dentojn, sidas Demĉjo en la ŝtona malseka fetora kavo. Fluas tempo, per neaŭdeblaj paŝoj pasas tago, ĝin anstataŭas somera humida blanka nokto. Revenas el la manĝoĉambro la frataro, la sonorilisto denove leviĝas sur la sonorilturon, anoncas tutnoktan diservon, la egalmezuraj sonoj fluas super Dvino. Demĉjo sidas senmove en potenco de vizioj. Nek malvarma obskuro, nek malsato, nek humideco, nenio povas deŝiri lin de la vivo, kiun pentras por li la imago. La tempo haltis, konfuziĝis, deŝoviĝis. Jaroj pasas dum sola momento, momento disetendiĝas al eterno.

Kviete, senmove, kvazaŭ malviva, sidas Demetrio.

2. Sur fremdlanda ŝipo

Oni ĵus tagmanĝis sur «Sankta Petro», kiam venis sendito de la estro de la eskorta ŝipo — Garrit Koost, kaj de alia eskortulo — Golgolsen, kaj de estroj de negocistaj ŝipoj — peti la caron kun la tuta sekvantaro veni sur «Aŭgustenon», kie al lia cara moŝto estos montritaj ĉiaj Marsaj ludoj, manovroj, ĉenkuglega pafado kaj ceteraj maraj amuzoj.

Petro ordonis tuj prepariĝi. La bojaroj ekoĥis, eksnufis, ĉiuj emis dormeti, sed ĉu eblas dormeti kun tia ĉi ulo! Skuante la barbojn, subtenante unu la alian, krucosignante sin, ili sidiĝadis en boatojn. Kaj kiuj estis pli junaj, la Petraj birdidoj, ensaltadis kun antaŭkuro, klinadis la boatojn, gaje ridegadis al la timigitaj maljunuloj...

Sur «Aŭgustenon» la gastoj trafis jam post la noktomezo kaj leviĝis laŭ la ŝtuparo en punca lumo de la nokta suno[57]. Ĉe la ĉefŝtuparo estis starantaj la eskortuloj Koost kaj Golgolsen, pli malproksime — la negocistaj ŝipestroj. Sur la vaksita ferdeko estis rulsternita riĉa tapiŝo; matrosoj kun sturmaj sabroj, grizaj pro nokta Dvina malvarmo, kvazaŭ rigidiĝis laŭlonge de la vojo, laŭ kiu devis iri la rusa caro.

Entirinte la kapon en la ŝultrojn, malpacience, abrupte Petro tuj ĉe la ŝtuparo demandis, kiel oni faras ĉenkuglegan pafadon kaj en kio tie estas la ĉefa arto. La nederlanda eskortulo respondis per demando — ĉu komenci de ŝnuraro? Ievlev apenaŭ aŭdeble sufloris, ke la caron ne endas demandi pri io ajn.

— Ho, se tiel... — kun mallonga rideto eldiris la eskortulo.

Petro demandis, pri kio temas. Apraksin tradukis, la caro ekridis, ordonis:

— Li demandu... vin. Mi aŭskultos!

— Kion ni havas super la supra ferdeko? — demandis Golgolsen.

Apraksin sen pripensi mallonge respondis:

— Kastelon.

57 Ne forgesu pri la blankaj noktoj *(trad.)*.

— Sub busprito?

— Martingalon! — de malproksime respondis Jakimĉjo Voronin.

— Kio estas tio?

— Martingalo estas trabo, por portado de martingalvelo destinita! — atendinte, kolere respondis la caro.

— Kie ni havas ĉef-top-mastkapon?

Ievlev etendis la manon, almontris per la fingro:

— Ĉu ĝi?

Al Petro tio tedis. Turninte sin al Garrit Koost, brilanta sub la leviĝanta suno per sia kiraso, li abrupte ordonis:

— Oni pafu kun tuta ebla rapideco el ĉiuj kanonoj de la babordo.

Matrosoj, obeante tamburadon, ekkuris en subajn ferdekojn — al la pezaj kanonoj, supren — al la malpezaj; Garrit Koost kriis al ili per paroltubo, kien pafi kaj per kiaj ŝargoj. Petro, mordante la lipon, rigardis al la plej proksimaj kanonistoj malpacience, tra la dentoj diradis al Ievlev:

— Vi rigardu, rigardu, kiel ili faras. Rigardu, notu...

Poste, ĵetinte la gantojn, forpuŝis de la vojo la dikan Van der Gulst-on, demandis kanoniston:

— El kio vi meĉojn ŝpinas? El kio?

La matroso palpebrumadis, ne komprenante, gaje ridetadis, svingante la bruligitan meĉon. Tiutempe al la caro, piedtrenante, kaŭriĝante, tute disetendiĝinte en rideto, aliris kun rememorigo pri si, pri sia vizito al la Perejaslavla lago, pri

la plej agrabla konatiĝo — ŝipestro Urquhart. Sed Petro, ne elaŭskultinte eĉ duonon, forpuŝis lin per la ŝultro kaj ekiris laŭ la ŝipo, demandante tra Ievlev kanonistojn — kiel ili direktas, kiom da pulvo metas; elŝirinte la meĉobastonon, mallarĝiginte la okulojn, pririgardis, per kio tenas sin la meĉo. El unu kanono li pafis mem kaj stamfis:

— Sufiĉe! Ili montru incendian alarmon.

Sub krakado de tamburo, sub hurlo de longa trumpeto la ŝipaj homoj ekkuris kun hakiloj, kun siteloj. La caro per mallarĝaj okuloj rigardis ilin, koleris, kial malrapide. Rjabov same subite koleriĝis — tiele ja la tuta ŝipo forbrulos, antaŭ ol ili komencos estingi.

Post la incendio estis farita vela manovro. La eskortulo Garrit Koost, kun spado, brilante per la ŝtala brustokiraso, ne surmetante pro ĝentileco ĉapelon, montradis preparitecon de siaj matrosoj, fanfaronadis, kiel rapide ili kuras sur stajoj, kiel streĉas kaj malstreĉas ŝkotojn, kiel alrulas kanonojn. Sur la vizaĝo de Petro estis enuo, li neniom kaŝis ĝin, rigardis ne tien, kiel almontradis la eskorta ŝipestro.

— Mi petas transdoni al lia cara moŝto, — ridetante per la lipoj, trahakitaj de cikatro, diris la eskortulo al Ievlev, — mi petas transdoni, ke ĉi manovroj estas miraklo, devenanta el tio, ke niaj matrosoj havas siajn praulojn same matrosoj, kaj la marista scipovo, rutino, lerteco, estas transdonataj ĉe ni kun patrina lakto. Tiu ĉi juna matroso tuj montros al lia cara moŝto sian bonegan scipovon...

Ulo kun forhakita orelo kaj arogantega vizaĝesprimo jam estis alirinta al la ĉefmasto, kiam subite al li antaŭiĝis Jakimĉjo Voronin, haltis kaj enpikis en Petron rigardon, plenan de

aŭdace gaja atendo. Petro diris nenion, nur ridetis per momenta rideto kaj deiris al ŝipestro Urquhart, kvazaŭ tute ne interesiĝante pri tio, kio okazos.

— Ĉu vi sukcesos? — per rapida arda flustro demandis Ievlev.

Voronin kraĉis al la manoj, senbotiĝis, krucosignis sin kaj ekkuris al la masto. Rjabov, ree aperinta apud Apraksin, mezuris per rigardo la maston, Voronin-on, la senorelan fremdlandanon kaj nelaŭte diris:

— Li venkos!

— Ĉu venkos ja? — turniĝis Apraksin.

— Certe, venkos...

Facile, rapide Voronin estis leviĝanta sur vantoj de la tribordo, dum la senorelulo iris supren laŭ vantoj de la babordo.

Ĉiuj sur «Aŭgusteno» rigidiĝis.

Garrit Koost etendis la lipojn tube. Golgolsen komencis murmuri interne, Jozefo Baĵenin ruĝiĝis, Teodoro ete krucosignis sin foje kaj ankoraŭ foje. Ievlev ĝis doloro kunpremis la kubuton de Apraksin.

Kaj Voronin plu grimpadis, liaj piedoj ĉiam pli kaj pli rapide paŝadis sur ŝnurŝtupoj, la manoj abrupte, impete levadis la korpon. Li trafis la unua sur la topon, kriis el tie per raŭka voĉo kaj ĵetiĝis supren al la flagmasto, lasinte fore malsupre la senorelan fremdlandanon. De la bramvanto sur la pinto mem li ree ion kriis, faris riverencon al ĉiuj kvar flankoj; ĉirkaŭiginte per la genuoj la bramstajon, li en unu momento deglitis sur la ferdekon kaj, alirinte al Ievlev, petis:

— Vi al la senorelulo, Silvestro, klarigu, ke kvankam mia patro ne nur maron ne vidis, sed eĉ riveron timetis, mi tamen kun tempo esperas iĝi ŝipestro kaj al iuj bravuloj intencas montri, ke ili ne fieru, ke naskiĝis en la mondo!

Ievlev ridetis, sed nenion tradukis; la senorelulo foriris tien, de kie li venis, kaj la eskortuloj jam ne plu montradis lertecon de siaj matrosoj. La ĉenkuglegan pafadon Petro spektis sen speciala intereso kaj nur interesiĝis pri la kanono, metita por sturma batalo tiel, ke ĝi pafu en la direkto de la buspritjardo per etaj feraĵoj, forbalaante sturmantojn de sur la ferdeko. Sed pri tiu kanono kaj pri ĝia konstruo li ne sukcesis ion ekscii. Golgolsen diris, ke tiun kanonon li tute ne konas, kaj la kanonisto, servanta ĉe ĝi, nun ebriiĝis kaj dormas en sia ĉelo...

Petro, sulkante la nazon, laŭte diris al Ievlev:

— Pensas mi, ke ĉiuj ili interkonsentis timigi nin, — kiom malfacila kaj nesuperebla por ni estas la mara kaj navigacia arto, kaj kiom nekompreneble por ni, kun nia mizereco, estas konstrui ŝipojn kun deca armilaro. Mi pensas, ke ili nin ne timigos, ĉu, Silvestro?

3. Unu mapo ne similas alian

Granda tablo kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis preparita sur la ferdeko, Petro sidiĝis en fotelon, verŝis por si bieron. Pala fremdlanda matroso elprenis el ujo violonon, frotis la arĉon per ŝtoneto, ekludis anglan dancon. La ceremoniaj sonoj ekfluis super la matena Dvino, la vizaĝo de la matroso iĝis malgaja, la okulojn vualis larmo. Apraksin, kaptinte momenton, sub la angla danco, kliniĝis al Petro, diris, ke necesas doni al fremdaj

matrosoj iom da mono. Teĉjo Prjanišnikov palpebrumis al Voronin, — Petro ne ŝatis doni monon, tion sciis ĉiuj.

— Kiom necesas? — demandis la caro, strabante per la okulo.

Apraksin levis la ŝultrojn.

— Ili forte penis por ni, sinjoro rotestro...

— Forte, ne forte! — grumble respondis Petro. — La amuzo ankaŭ por ili mem taŭgas. Kiom doni?

Apraksin, retenante ekbolantan koleron — li bone sciis, per kio tio finiĝos, — diris, ke necesas por la tuta ŝipanaro ne malpli ol tri ormoneroj. Petro ankoraŭfoje ĵetis straban rigardon, ne ĝeniĝante pro la eskortuloj kaj ŝipestroj, longe fosis en la monujo, elprenis unu moneron, donis ĝin al Apraksin kaj ordonis:

— Kaj se malmulte, tiam tute ne doni!

Teĉjo Prjanišnikov hihiis, kaŝinte la bruniĝintan pro drinkado vizaĝon malantaŭ boteloj de sekvino kaj de «Krista larmo». Apraksin, elpreninte sian monujon, aldonis al la cara monero du siajn, leviĝis kaj ekiris al la ferdekestro.

Malgraŭ penemaj zorgoj de la eskortuloj kaj ŝipestroj, la gastoj enuis, sekvino kaj «Krista larmo» ne iris en la gorĝojn, oni devis sendi Rjabov-on sur la Mosean insulon por juniperbrando kaj gdanska vodko. La rudristo revenis ne tuj, leviĝis laŭ la eskalo kun moroza vizaĝo, kun bruo starigis la bareletojn apud Ievlev, sen riverenci ekiris reen sur la ŝalupon. La fremdlandanoj akompanis la malĝentilulon per miraj rigardoj, Urquhart riproĉe balancis la kapon. La caro rimarkis nenion — li estis elesploranta de ebriiĝinta najbaro-eskortulo la

sekreton de la ĉenkuglega pafado...

Jakimĉjo Voronin verŝadis al Golgolsen juniperbrandon kun pulvo, per dolĉa voĉo aldiradis:

— Tio estas ja ne «Krista larmo»! Tio estas ne malvazio! Tio estas ne rejnvino! Faru!

Golgolsen «faradis», elmetadis la okulojn, spiregadis.

La batalo kontraŭ «Ivaĉjo Ebria» estis ĉe sia kulmino, kiam Jakimĉjo frapis la tablon per la muskola pugno kaj kriis tiel, ke ĉiuj turniĝis al li:

— Ne estas? Mensogas vi, estas! Ĉi tie tiaj marlaboruloj estas, ke vi eĉ ne sonĝis! Mensogas vi!

Golgolsen al la ofendo intencis respondi per spada bato, sed Voronin ne permesis, kaptis la spadeton je la tenilo, tiris al si kaj demandis mirigite:

— Ĉu vi freneziĝis?

La eskortulo movadis per siaj teruraj volvitaj lipharoj, sibladis, kiel kato, la pulva juniperbrando, kiel varmega stano, estis bruliganta liajn internaĵojn.

Urquhart, por ke estiĝu paco, ĝentile enmiksiĝis la disputon: sinjoro Golgolsen tute konsentas kun sinjoro Voronin, — certe, inter la pomoraj loĝantoj ekzistas homoj, scipovantaj agi per remilo kaj eĉ malgranda velo. Sed ĉu tio estas navigistoj?

Golgolsen-on tenis je la ŝultroj kaj la kubutoj ĉirkaŭ kvin matrosoj. Li plu estis siblanta.

— Bedaŭrinde, tio estas ankoraŭ ne navigistoj, — diris Urquhart, ĝentile ridetante. — Navigisto devas perfekte posedi mapon, kompason, astrolabon, alidadon. Sed ĉu ekzistas ĉi tie,

inter la plej bonaj pomoraj rudristoj, almenaŭ unu, scipovanta kompreni mapon? Jen antaŭnelonge venis ĉi tien rudristo Ivano. Certe, li scias sian aferon. Sed ĉu li povas meti kurson de ŝipo laŭ indikoj de kompaso? Kaj ĉu li vidis la miraklan maŝinon — nokturlabon? Jen en kio estas la esenco de la disputo.

— Estas tiel! — kriis Golgolsen.

Urquhart haltigis lin per milda gesto.

— Se la rusoj deziros havi ŝipojn por amuzaj promenoj de lia cara moŝto, — daŭrigis li, — tiam, sendube, sinjoroj konsilistoj de lia cara moŝto devos dungi eksterlandajn navigistojn, kiuj kun grandega ĝojo servos al tia klera kaj malavara monarko, kiel lia sanktoleita moŝto! Mi mem! — ekkriis Urquhart. — Mi povas rekomendi nemalmultajn plej spertajn maristojn al lia moŝto rusa caro...

Petro silentis: sobra, kolere pufigante la nazotruojn, li estis ĉirkaŭrigardanta la siajn, — evidente, ne sciis, kion respondi. Poste li abrupte turnis la konversacion al eliro en la maron: kiam la negocistoj estos forirantaj, li akompanos ilin sur sia jaĥto. Ili komencis kalkuli tagojn per fingroj, fiksadis ordon de ŝipoj, rezonadis, kie iru la cara jaĥto, poste rememoris kaj demandis, kiu iros sur ĝi kiel rudristo.

— Rjabov! — diris Ievlev.

Urquhart ridetis kun kompato kaj malestimo. Ievlev, sentante, ke la sango ĵetiĝis al lia kapo, ordonis tuj voki de la ŝalupo la rudriston. Matrosoj impetis al la ŝipflanko, Rjabov sendezire leviĝis sur la ferdekon, aliris la tablon, ĉe kiu estis zumantaj kaj kriantaj malakorde rusoj, holandanoj, angloj,

germanoj. Malplenaj boteloj estis ruliĝantaj sub la piedoj, fumo de argilaj pipoj sterniĝis super la festeno, multaj estis tute ebriaj, aliaj duone. Nur Ievlev, la caro, Apraksin kaj maljuna Patriko Gordon rigardis sobre, severe, postuleme. Kaj ankaŭ ŝipestro Urquhart subite kvazaŭ pikis la rudriston per mallonga dorna rigardo.

— Ekstaru ĉi tie! — ordonis Apraksin.

Rjabov ekstaris, larĝe dismetinte la piedojn, ŝovinte la manplatojn sub la broditan de Taisja zoneton. Garrit Koost tenis en la mano dense volvitajn paperfoliojn, frapetante per ili la tablon. Golgolsen, farinte misteran vizaĝon, estis turnanta en la manoj grandan kompason.

— Aŭdis ni hodiaŭ, — malrapide ekparolis Petro, — kaj ankaŭ mem en konversacioj kun vi havis okazon konvinkiĝi, ke estas vi la plej bona en la lokaj Blankmaraj teroj rudristo, alivorte navigisto. Kaj se vi estas navigisto, tiam la kompason devas lerte regi. Ĉu konas vi ĉi miraklegan maŝinon?

Golgolsen, moke ridetante, etendis al la rudristo la kompason.

— En nia, marista maniero, tio estas «matka»[58] — patrino. Tiel ni ĝin nomas! — diris Rjabov. — La maŝino vere estas miraklega. Kaj patrino ĝi nomiĝas tial, ke en maro sen kompaso estas kiel sen vera panjo.

Li ridetis, rigardante al la tremanta nadlo, ion rememorante.

— Kial vi ĝojas? — demandis Ievlev.

---

58 Etimologie probable de la finna kaj karela *matka* — «vojo», sed en la popolo tiu vorto estis interpretata kiel derivaĵo de la vorto «patrino» *(trad.)*.

— Mi rememoris, kiel patro mia min instruis, kiam mi ankoraŭ Ĥaradrio estis: en tiu ĉi, diris, skatolo sidas vireto Fingreto, turnas ĉiam la nadlon al la nokto, kiel fremdlandanoj diras — al la nordo. Dum longa tempo mi, knabo, pri tiu vireto kredis, ĉiam enrigardadis — ĉu mi povos rimarki, kiel li la nadlon turnas...

— Ĉu ne rimarkis? — demandis Apraksin.

— Ne sukcesis, — kun larĝa rideto respondis Rjabov. — Ŝercis mia patro...

— Ĉi maŝino, — diris Ievlev, — baziĝas sur tio, rudristo, ke la magneta nadlo ĉiam okupas en la spaco pozicion, kiu al ĝi estas destinita per homa saĝo...

— Kompason vi konas, — interrompis Petro, kaj estis videble, ke li estas kontenta. — Ĉu multaj aliaj ĉi-tieaj rudristoj konas kompason?

Rjabov pensis, respondis sen hasto:

— Multaj, Siro, preskaŭ ĉiuj. Kiom vi bezonos, tiom vi trovos.

— Kvin? Dek? Kvindek? — malpacience, sed gaje demandis Petro.

— Estos pli, Siro. Kiu estas de la Blanka maro laboranto — tiu estas maristo. Kaj nia maro ja estas nemalgranda, popolon sur ĝi per fingroj ne eblas nombri...

Li ankoraŭ pensis, ridetis kaj aldonis:

— Virinoj niaj, pomorinoj, fiŝistaj edzinoj — ankaŭ ili rudristas. En la maro ili ne krios, ne ploros. Ili de la plej junaj jaroj en la maro vivas, per la maro sin nutras...

— Kaj ĉu ĉiuj la navigistan arton scias? — demandis Petro.

— Estas tiuj, kiuj kompason ne havas, Siro, laŭ signoj iradas, laŭ steloj.

— Kaj ĉu en la oceanon ili tiel iras?

— Ĉu oceano ne estas akvo?

Petro ekridis. Rjabov metis la kompason sur la tablon, ree ŝovis la manplatojn sub la zoneton. Ŝipestro Urquhart kliniĝis al Ievlev, ion diris al li. Tiu, abrupte movinte la ŝultron, forsvingis.

— Kion li diras? — demandis Rjabov.

— La ŝipestro asertas, ke la lokaj pomoroj ne konas mapon, — diris Ievlev. — Ĉu tiel, rudristo?

— Unu mapo ne similas al alia, — respondis Rjabov. — Ili, fremdlandanoj, havas siajn mapojn, ni — niajn. Ni laŭ la niaj iradas.

Urquhart, ĝentile ridetante, kliniĝis nun al la eskorta ŝipestro. Tiu disvolvis sur la genuo grandan folion de densa papero. La folio ektremis sub vento. Tio estis la Somera bordo de la Blanka maro kun la Una golfo. Rjabov rigardis longe, mallarĝiginte la okulojn.

— Ĉu konas vi ĉi lokojn? — demandis Petro.

— Estis mi tie! — respondis la rudristo.

— Kial do vi silentas?

— Tial mi silentas, Siro, ke malĝuste la mapo estas farita.

Urquhart levis la brovetojn. Kun laca malestimo, kun enuo en la okuloj estis sidanta sur sia seĝo la homo, kiun Rjabov

antaŭnelonge opiniis la caro, — Lefort. Golgolsen estis orgojle ridanta.

— Ĉu malĝuste? — demandis Petro. — Sed ĉu scias vi, kiu tiun ĉi mapon faris? «Zee-Fakkel»[59] neniom pli bonas, ol ĉi bildo. Fama ŝipestro Hamburga nomata Schmidt, de ŝtormo pelita en la Unan golfon, pli ol semajnon pasigis tie; kiel donaco al vojevodo Apraksin li mezuris la golfon kaj sur la paperon ĝin metis...

Petro koleris, la fremdlandanoj estis subridantaj, Ievlev rigardis al la rudristo kun malkvieto. Rjabov respondis trankvile:

— La ŝanelo estas malĝuste indikita, Siro. Kiel ĉi tie povas iri ŝipoj, se jen estas malprofundaĵo, grandega benko, kaj jen ankoraŭ pli granda. Vi iros laŭ tiu ŝanelo kaj sidigos vian ŝipon sur ŝtonojn...

Urquhart ekridis. Petro ĵetis al li rigardon, kriis al Rjabov:

— Kun klera navigisto vi disputas, kun fama ŝipisto...

Li en incitiĝo forturniĝis de Rjabov. Urquhart kaj Golgolsen dismetis antaŭ li ankoraŭ foliojn — mapojn. La rudristo staris senmove, pri li oni kvazaŭ forgesis. La mapoj estis multaj, Rjabov el malproksime rekonadis — Tri insuloj, Sosnovec, la Vintra bordo. Ĉie estis desegnitaj ŝipoj, hometoj, domoj. Petro admiris la artan verkon. Ievlev diris:

— La lokaj pomoroj, Siro, havas siajn «navigtabelojn» kaj «marajn ukazojn», kie multaj utilaj konsiloj...

Petro ne aŭskultis.

---

59 «Mara torĉo» *(nederlande)* — fama nederlanda maparo kaj manlibro fare de Johannes van Keulen ekde la jaro 1681 *(trad.)*.

— Tiujn ĉi mapojn mi vidas, kaj pri kio vi diras — nur aŭdas. Aŭdi ne sufiĉas!

Levinte la kapon, li ekrigardis al Rjabov, diris:

— Ĉi rudristo iros kun ni en navigadon kiel ĉefmatroso. Sed kiel ŝipestro iros sperta fremdlanda maristo, kiun sinjoro Urquhart proponas, — hispano del Robles...

Urquhart riverencis.

Rjabov staris senmove, kvazaŭ temis ne pri li; nur liaj helaj okuloj malheliĝis, kaj inter la brovoj aperis maldika sulko.

— Matrosojn sur nian jaĥton preni el pomoroj kaj en tio ne malrapidi! — daŭrigis Petro. — Kaj post tio ni drinku por adiaŭo; tempas foriri, ni gastis sufiĉe...

Li mallarĝigis la okulojn kaj demandis Gordon-on:

— Kial vi malgajas hodiaŭ, sinjoro admiralo? Kial vi ne drinkas vinon?

Patriko Gordon suspiris longe, maljunulece, glutis el la kruĉeto por deco. Respondis li al la caro nur kiam ili estis malleviĝantaj sur la ponteto:

— Hodiaŭ vi estis maljusta, mia reĝa amiko Peter. Vi amas vero. Do sciu ĝi.

— Ĝin! — elmalproksime, sen moko korektis Apraksin.

— Ĝin! — obeeme kaj kutime konsentis Gordon. — Sciu do ĝin: tia maristo, kiel estas Rjabov, — estas pli bona, ol ajna alia maristo. Ili havas belaj mapoj, sed ĉu eblas supozi, ke ili konas tiu... naturo... maro pli bone, ol li konas...

Petro oscedis, paŝis en la ŝalupon, eksidis sur benkon,

kovritan per tapiŝo, karesis la ŝultron de Gordon:

— Ni multe drinkas, sinjoro Gordon, jen kio estas malbona...

— Mi ne multe drinkas! — koleriĝis Gordon. — Mi deziras ankoraŭ paroli al vi, Peter...

— Ni havos tempon, ankoraŭ sufiĉe interparolos! — diris Petro. — Ne morgaŭ, mi pensas, ni mortos.

Super la ŝalupo flugis mevoj, jam estiĝis tago, en la Arĥangelskaj preĝejoj oni estis sonorantaj. Petro dormetis, envolvinte sin en mantelon. Gordon, kolere rigardante al la kvietaj Dvinaj akvoj, estis flustre sakranta ne en la rusa lingvo.

4. Riska komisio

En tiu mateno li estis invitita manĝi ĉe kolonelo Snivin, la edzo de lia filino. La tablo estis primetita en la parko, inter trunkoj de maljunaj betuloj. Alpelitaj el submontaj vilaĝoj servistinoj en helenaj ĥitonoj kaj florkronoj, en sandaloj, kudritaj por tiu ĉi okazo el ledaĵoj, destinitaj por la armeo, en orbrokitaj zonetoj kaj kupraj braceletoj, portadis al la tablo fiŝajn rondpanojn, pirogojn, drinkaĵojn kaj trinkaĵojn. Speciala servistino, vestita kiel paŝtistino, kaj kun ŝi knabo — tute malgranda paŝtisteto — surtabligadis turkan kafon en konkoj kun arĝentaj teniloj. En laŭbo, kaŝitaj de la okuloj per arbustaro, ludis muzikistoj de fremdlandaj ŝipoj — violono, fluto kaj liuto. Krom Gordon, ĉi tie estis ankoraŭ nur unu gasto — majoro James.

Gordon venis perpiede, sen akompanantoj, vestita simple:

en kaftano el griza drapo super leda kamizolo. En la mano li havis bastonon kontraŭ hundoj, en la dentoj — mallongan ĉibukon. La helenaj junulinoj en ĥitonoj — timigitaj, malfeliĉaj paŝtistinoj — kaj la muziko trans la arbustoj al li ne plaĉis. Li kuntiris la brovojn kaj nenion trinkis kaj manĝis. Lia filino Anabela — la edzino de la kolonelo Snivin — rigardis al la patro malgaje, — kiel li maljuniĝis, kiaj profundaj faltoj kuŝiĝis sur la vizaĝo, kiel li suspiras...

Post kafo la patro kaj la filino ekiris promeni en la parko. Mallaŭte, sub matena Dvina venteto, estis interflustrantaj la betuloj. En interspacoj inter arboj arĝente briletis la larĝa rivero. Gordon brakumis la filinon je la talio, ŝi metis sian kapon sur lian larĝan, ankoraŭ fortikan ŝultron.

— Via edzo estas ŝtelisto! — diris Patriko Gordon nelaŭte, sed firme.

Anabela tremeris.

— Via edzo estas malpura ŝtelisto! — ripetis Gordon ankoraŭ pli mallaŭte. — Vi ne devas timiĝi, mia infano, mi ne intencas al iu denunci lin, denunco entute ne estas en miaj principoj de honoro. Sed ĉi tie la afero estas multe pli serioza, ol vi povas imagi. Nin ne tre ŝatas la rusoj. Kaj pro kio ili ŝatu nin? Fraĉoj, fremdulaĉoj — tiel ili nomas nin, mi mem tion aŭdis. Jen iras fraĉo, diras ili, almontrante nin per la fingroj. Ili scias, ke homoj, venintaj el trans la maro, estas kruelaj al ili, priŝtelas ilin, mokas ilin. Ĉu via edzo almenaŭ en io faris bonon al tiu ĉi lando? Ĉu li ŝtelas ne por tio, ke, reveninte al la patrujo, aĉeti por si licencon por generala rango? Anabela, vi devas helpi min. Vi devas kompreni, ke tio ne povas finiĝi bone. Kaj vi komprenas tion, ĉu? Vere? La malpura ŝtelado,

farata de via edzo, malpurigas ne nur lin, sed ankaŭ min, kaj ne solan min, sed ĉiujn, kiuj servas al la caro per sia spado...

Anabela ĵetis al la patro malkonfidan rigardon.

— Por mi sufiĉas vagadi tra la mondo, — daŭrigis li. — Mi estas maljuna kaj deziras morti, ne rompinte mian ĵuron. Mi servadis al la svedoj, servadis al la poloj — por mi sufiĉas. Almenaŭ ĉi tie mian nomon nenio makulis. Ĉu mi povas peti vin pri unu afero? Ke via edzo pensu ne nur pri si, sed ankaŭ pri mi. Ĉi tien lin instalis mi, se li memoras tion.

Anabela kunplektis la manojn, krakis per la artikoj...

— Ni tiel deziras hejmen! — ekkriis ŝi. — Al ni estas tiel malfacile ĉi tie. Vi ne komprenas kaj ne deziras kompreni, ke licenco por generala rango signifas trankvilon kaj sendependan staton de niaj infanoj...

— Al diablo la infanojn! — kriis Gordon. — Ne ekzistas tia fiulo, kiu, farante fiaĵon, ne dirus, ke tio estas por la infanoj. Al diablo la infanojn! Kaj se temas pri infanoj, tiam bonvolu pensi ne nur pri la viaj. En tiu ĉi lando estas multaj infanoj, tamen vi ne pensas pri iliaj sortoj...

— Sed, patro, necesas ja kompreni...

— Mi nenion komprenas kaj ne komprenos! — kriis Gordon, kaj lia vizaĝo kovriĝis per ruĝaj makuloj. — Jes, mi ne komprenas, kial, se vi deziras hejmen, — necesas ŝteli. Mi ne komprenas tion kaj ne deziras kompreni. Por mia malfeliĉo — ĉi tien al ili venas friponoj kaj sentaŭguloj. Mi pensis, ke via edzo prudentiĝos ĉi tie kaj ĉesos esti tio, kio li estis tie. Sed li iĝis centoble pli malbona — tiu falsigisto de aliulaj subskriboj, kiu apenaŭ evitis pendumon, bedaŭrinde — evitis. En Moskvo

li tiel turmentis rusajn soldatojn, la plej bravajn el tiuj, kun kiuj mi havis okazon batali brakenbrake, ke lin necesis forigi ĉi tien, sed ankaŭ ĉi tie li ne trankviliĝis... Ha, por kio mi diras tion al vi! Vi ne kredas al mi, kial vi kredus, ja vi estas sorĉita de via edzo...

Ili longe silentis. La vizaĝo de Gordon estis severa, malgaja; preskaŭ flustre li diris:

— Tio estas granda popolo! Tio estas bonkora, sincera popolo. Kaj ni venas al ili kun nigra animo, por priŝteli, trompi kaj forkuri. Ni nur multe parolas pri honoro kaj multe batalas en dueloj, sed neniu el ni provis honeste servi al ili...

— Ili ne fidas nin, — mallaŭte diris Anabela.

— Mi same ne fidus homon, kiu deksesan fojon vendas sian spadon! — respondis Gordon.

— Vi vane tiel diras, patro. Ekzemple, sinjoro James estas tre afabla kaj bonmaniera junulo.

Gordon subridis sole per la lipoj.

— Mi ne devus paroli kun vi, vi nenion komprenis. Sed nun vi komprenos.

Li metis la pezan fortan manon sur la ŝultron de la filino kaj ekparolis, rekte rigardante en ŝiajn okulojn:

— Mi restos ĉi tie, en Rusio. Kaj se almenaŭ guto da koto falos sur mian nomon kulpe de via edzo, li estos grave punita. Kaj mi ne movos eĉ fingron por defendi lin. Eĉ pli: mi diros, ke oni permesu al mi juĝi, kaj oni permesos, ĉar eksterlandanojn ĉe ili juĝas eksterlandanoj. Kaj kiam oni permesos, mi subskribos nur unu verdikton: pendumi...

— Pendumi?!

— Jes, fari finfine tion, kio ne estis farita en Edinburgo. «Je la kolo, — kiel oni skribas en nia lando kaj kiel skribis la juĝistoj en tiu memorinda por vi tago, — je la kolo, por ke li pendu tiel ĝis la morto, kaj post ĝi tiom, kiom necesas, ke lia peka animo ekstaru antaŭ la granda juĝisto...»

— Ĉu mi devas ĉion ĉi rediri al li?

— Nepre. Li ne estas tro kuraĝa, via edzo, kaj rememorigo pri la maŝo, el kiu li siatempe eskapis, eble malvarmigos en li soifon de akirado. Adiaŭ kaj akompanu min. Mi ne plu deziras vidi vian edzon...

— Kaj la infanojn, patro?

Gordon paŭzis, poste diris decideme:

— Ne, ne hodiaŭ.

Anabela akompanis la patron ĝis la pordego kaj mem riglis post li la barilpordon. En la korto estis raŭke bojantaj kaj saltantaj ĉenhundoj. El la parko aŭdiĝis muziko — la ŝipaj muzikistoj estis ludantaj polonezon. Anabela rebonigis sian hararanĝon kaj ekiris al la tri betuloj — tien, kie la edzo kaj James estis trinketantaj malvarman vinon...

— Nu? — demandis la kolonelo. — Ĉu la maljunulo decidis dormi?

— Por li oni alveturis! — mensogis Anabela. — Li iĝis necesa al la Siro...

Kolonelo Snivin elorbitigis la okulojn.

— Kiam? Mi nenion scias. Al mi oni ne raportis...

Anabela ne respondis. Post kiam James adiaŭis, ŝi mallaŭte ekparolis:

— La patro suspektas ĉion, kaj eble eĉ scias ĝuste. Li nomis vin malpura ŝtelisto kaj diris, ke li postulos por vi pendumon, se vi enkaptiĝos. Kaj li tion faros, mi bone konas lin. Li neniam ĵetas vanajn vortojn...

La kolonelo profunde enpensiĝis. Komence li nur snufadis kaj nenion povis elpensi, poste lia grasa vizaĝo iĝis decidema, li eksnufis pli laŭte kaj ordonis tuj voki al si ŝipestron Urquhart-on kaj sinjoron James-on.

— Kion vi faros? — demandis Anabela.

La kolonelo respondis nenion.

Kun Urquhart li interkonsentis rapide. James-on li demandis:

— Ĉu inter la soldatoj de la dogana skipo troviĝos homo, fidela al vi? Homo, kiu pretos plenumi riskan komision?

James enpensiĝis, gratis la mentonon kun kaveto.

— Temas ne nur pri mi. Temas ankaŭ pri via estonteco. Pensu pli rapide — tempo neniom toleras prokraston.

Ili decidis voki tiun kaporalon, kiu vipis iam per angla krudleda rimeno leŭtenanton Krikov-on. Post horo kaj James kaj Snivin sidis antaŭ la kaporalo en malbutonitaj kaftanoj, koleraj, demandadis tiel rapide, ke la kaporalo ne sukcesadis respondi. La servistinoj en helenaj ĥitonoj herde pretiriris por redoni la ĥitonojn, sandalojn kaj zonojn kun braceletoj al la tolaĵistino. La kaporalo frostosenteme movis la ŝultrojn.

— Ĉu vi konsentas, Kostjukov?

— Tro timinde, sinjoro...

— Galimatio! — diris Snivin. — Bagatelo! Hodiaŭ venos ankoraŭ tri ŝipoj, li kontrolos ilin. Dum li kontrolos — pasos tago. Ne malpli!

— Estas tiel... Sed tamen timinde. Se iu vidos, kiel mi eniris kaj eliris...

— Nu, vi diros ion... ke vi eraris... Ormonero estas nemalgranda mono, vi, verŝajne, tian monon eĉ ne vidis. Nun vi ricevos unu, kaj kiam vi faros — duan...

Kaj Snivin ĵetis sur la karnodika polmo hele brilintan moneron.

Kostjukov silentis.

— Do, vi ne deziras? — diris Snivin. — Sed tio estas domaĝe. Tre domaĝe. Jen sinjoro James estos reen al vi nomumita — vi iĝus gardisto de la dogana tenejo, sed tiele kio... Vi estas malfidela homo, al vi iĝos tute malbone...

Kostjukov suspiris.

— Ĉu vi ne deziras?

— Donu! — diris la kaporalo. — Donu, mi faros. Metos pekon sur mian animon...

James metis sur la tablon tri talerojn. Sur ĉiu per fajlilo estis faritaj noĉoj: sur unu duobla kruco, sur la dua du strekoj, sur la tria dentoj. Tiujn tri monerojn la majoro envolvis en ĉifoneton kaj etendis al Kostjukov.

— Kaj tiun ĉi — al vi! — diris li kaj donis al li la kvaran sen ajna signo.

Kostjukov riverencis.

— Nun iru! — ordonis la kolonelo.

La kaporalo suspiris kaj ekiris. James kaj Snivin akompanis lin per la okuloj kaj interrigardis.

— Ne! — diris James. — Li ne faros!

Kaj kriis:

— Kostjukov!

La kaporalo revenis kure.

— Ni ŝercis! — diris James. — Nun ni scias, vi estas fidela homo. Redonu la monon.

Kostjukov kun preteco redonis ĉiujn kvar monerojn.

— Kaj per tio drinku! — ordonis James kaj ĵetis al la kaporalo arĝentan rublon. — Drinku ankaŭ je nia sano. Iru!

La kaporalo viŝis ŝviton, malforte ridetis kaj riverencis. Lia vizaĝo iĝis feliĉa.

— Aĥ, Dio mia! — diradis li, paŝante al la doganejo. — Aĥ, kia afero...

La vojo estis longa, la kaporalo rememoris pri la rublo kaj iris por regali sin en la drinkejon. Magrulo elprovis la rublon per la dento kaj miris:

— Vidu, arĝenta. Longe mi ne vidis veran monon... Kion do al vi doni, kaporalo?

Kostjukov drinkis gdanskan vodkon, svingis la kapon kaj diris:

— Jen kiele! Kio okazas al homo...

Poste li drinkis duoble distilitan vodkon, poste la bojaran, poste bieron. Kaj, akirinte kuraĝon, ekpaŝis en la doganejon al leŭtenanto Krikov.

— Kaj mi diros! — rezonadis Kostjukov. — Honeste diros! Kial ili malbone faras? Ĉu sur mi ne estas kruco? Ĉu mi estas tataro? Mi estas rusa homo kaj malbone fari al neniu permesos. Mi estas ne ia angla fremdulo. Mi estas kaporalo, jen kiu mi estas! Kaj ankaŭ tiujn monerojn mi al li montrus, kaj punkto! Kaj al li estu averto. Li estas homo simpla, de nia, laborula deveno... Ĉu mi ion faras malbone?

Kostjukov ekvidis akvoportiston kun barelo kaj kriis:

— Haltu! Ĉu en fremdaj landoj vi estis? Ĉu vi havas armilon sur la ŝipo pli ol estas difinite kontraŭ mara pirato? Respondu, kiu estas antaŭ vi.

— Ĉu vi diboĉas? — demandis la akvoportisto.

— Nu, diboĉas! Kaj vi respondu! El kiu lando vi navigas?

— El la lando, do... el tiu... el la vilaĝo...

— Tiam iru kun mi, mi regalos, se vi estas nia...

Duope ili sidiĝis sur la barelĉaron kaj veturis al Magrulo. Tie ili diboĉis longe, kaj Kostjukov, reveninte al la doganejo, subite forgesis, kion li bezonis diri al la leŭtenanto. Li staris kaj ridetadis, rigardante, kiel Atanazio Petroviĉ per malgranda ĉizileto finfaras ridindegan homan figureton el rosmara eburo.

— Nu, iru, frato, iru! — ordonis Krikov. — Iru! Vi diboĉis, kaj nun dormu. Jen ŝipoj baldaŭ venos — kontroli necesas...

— Kaj li estas kiu? — demandis Kostjukov, almontrante per la fingro la figureton.

— Ja tiel, simple pro enuo! — eldiris la leŭtenanto.

— Lasu, Atanazio Petroviĉ, — mi vidas. Ekspopo li estas — jen kiu! Kaj antaŭ nelonge vi fremdlandanon elĉizis, kiu kontraŭ homoj stamfas...

En tiu momento Kostjukov komencis rememori, por kio li venis al Krikov, sed ne sukcesis rememori, — denove distriĝis, kaj ankaŭ Krikov serioze koleriĝis kaj pelis lin dormi.

5. «Gaja koketo»

Vespere kontraŭ la fremdlanda Komerca korto[60] ĵetis ankrojn sur Dvino tri ŝipoj sub fremdlandaj komercaj standardoj: «Vespera ripozo», «Trobadoro» kaj «Gaja koketo». Doganaj oficistoj, deklarinte por la du aliaj ŝipoj kvarantenon, leviĝis laŭ la ĉefŝtuparo de «Gaja koketo». Krikov — kun spado kaj ĉapelo — prononcis la preskribitajn demandojn, elaŭskultis la preskribitajn respondojn kaj foliumis etaton de holdaj kaj ferdekaj varoj. Ŝipestro Danberg — maljuna multsperta ruzlertulo, Vulpo Vulpoviĉ, kiel nomadis lin la doganistoj, — rigardis en la okulojn de Atanazio Petroviĉ sen palpebrumi.

— Kaj nun diru veron, por ke la homoj vane ne penu! — diris Krikov. — Kion vi alveturigis, sinjoro Danberg?

Danberg rigardis rekte en la okulojn.

— Mi ne kredos, ke vi, sinjoro Danberg, maljuna kaj sperta negocisto, venus al la fino mem de la foiro kun tia bagatela kargo. Kvarfoje laŭ mia memoro estis al via ŝipo de ni deklarita konfuzo. Ni unu la alian vidas trae. Tutegale mi al vi, kara

60 En Arĥangelsko tiam estis du Komercaj kortoj — la rusa kaj la fremdlanda *(trad.)*.

amiko, ne kredas eĉ je grajno. Diru, kion vi alveturigis?

Danberg subridis kaj dismovis la manojn. Tuta lia vizaĝo faldiĝis per etaj sulkoj, kiel malplena monujo, — tio signifis, ke li gajiĝis.

Atanazio Petroviĉ komandis al la doganistoj — komenci la kontrolon. Ili fosis dum pli ol tri horoj — neniu trovis ion ajn. Danberg, apoginte sin al la foteldorso, trinkadis kafon kaj rigardadis malproksimen. Sur la urbon estis malleviĝanta vespera nebulo, en la hela ĉielo flagris steloj...

Krikov leviĝis el luko, deskuis polvon kaj araneaĵon de la genuoj kaj ŝultroj, aliris al Danberg. Kaj miris, kial la ŝipestro trinkas sian kafon en tia stranga loko — sub la ĉefmasto. Ĉu en tiela loko estas oportune sidi kaj trinki kafon?

Per firmaj paŝoj li aliris la ŝipestron kaj ordonis deŝovi la fotelon.

— Sed por kio? — miris Danberg.

— Por tio, ke mi tiel ordonas! — respondis Krikov kaj mem depuŝis la pezan, tegitan per ledo fotelon.

Sur flava vakso, kovranta la ferdekon, li ekvidis maldikan fendon. Ĝuste tiu fendo pereigis Danberg-on. Ĝuste ĝin li estis ŝirmanta per sia fotelo.

— Luko! — prononcis Krikov. — Malfermu, sinjoro ŝipestro.

Danberg premis sekretan risorton. En malgranda kaŝejo staris bareleto, firme garnita per feraj bendoj, kverka, kun komplikaj duopaj ĉarniroj. Atanazio Petroviĉ ŝire starigis la bareleton sur la ferdekon, demandis severe:

— Mono?

— Ne mia! — ekkriis la ŝipestro. — Je Dio sankta mi ĵuras, — ne mia. Miaj maljunaj okuloj ne plu vidu la gepatrajn bordojn, se mi eldiros mensogon: ŝipestro Urquhart...

Atanazio Petroviĉ diris mallaŭte:

— Hunda filo — jen kio vi estas! Se dependus de mia volo — mi vin alpikus per la spado al jen tiu ĉi masto, kaj pendu, ĝis vi putriĝos. Vi ĉiuj vin opinias pli saĝaj ol ni, dum por viaj profitoj al niaj laboruloj oni en la gorĝon fanditan plumbon verŝas. Latronoj fiegaj!

Turniĝinte, li ordonis al la doganistoj:

— Tamburo, batu konfuzon! La ŝipestron aresti! Al tiu ĉi bareleto — gardsoldaton. De la du ŝipoj la kvarantenon ne forigi ĝis morgaŭ. Ĉe la tagiĝo ni komencos tie kontrolon.

6. Denunco

Ĝuste en tiu sama tempo, kiam Krikov kun plena severeco estis dogankontrolanta «Gajan koketon», leŭtenanto James sur griza kun makuloj ĉevalino trote alrajdis la doganejon, salte deĉevaliĝis kaj leviĝis sur la peronon de tiu domo, kie li iam loĝis mem kaj apud kiu penis mortigi sin Atanazio Petroviĉ. Ĉi tie majoro James konis ĉiun najlon. Tirinte la neŝlositan pordon, li serĉis per la okuloj la breton, sur kiu iam staris liaj sep formiloj kun perukoj, kaj metis en ties angulon tri talerojn, diligente volvitajn en ĉifonon. Poste, senzorge fajfetante, li eliris kaj ekrajdis, implikante la spurojn, — el strato en straton, el interstrato en interstraton...

Sur la kajo, apud la fremdlanda Komerca korto, estis promenanta, metinte la mallongajn brakojn post la dorson, ŝipestro Urquhart. De la rivero, de tie, kie staris la antaŭnelonge venintaj ŝipoj, estis aŭdiĝanta monotona tamburado.

— Ĉu vi aŭdas, sinjoro? — demandis la ŝipestro, kapmontrinte la riveron. — Li trovis. Trovis, damnita doganisto!

— Kion li trovis? — levinte unu nigrigitan brovon, demandis la majoro.

— Kion li bezonis, tion li trovis. La maljuna vulpo Danberg perfidos min kaj almiksos vin. Povas okazi, ke li havos arogantecon diri eĉ la nomon de la kolonelo...

— Finu pli rapide! — diris James. — Finu tuj!

— Mi povas veturi sur la Mosean nur matene. Nun la caro ne parolos kun mi...

Al la bordo aliris boato, el ĝi facile elsaltis leŭtenanto Krikov. Kun li estis nur tri doganistoj — al la ceteraj estis ordonite plenumi sur la ŝipoj gvatan servon. James kaj Urquhart eksilentis...

Nokte la majoro kaj liaj soldatoj helpis al ŝipestro Urquhart meti en boatojn du tre malnovajn ĉenkuglegajn kanonojn, kiuj povis pafi per kuglegoj, ligitaj per ĉeno. Samtie estis metita municio por tiuj kanonoj — pulvo, pulvujoj, rezervaj ĉenoj. Tia ĉeno devis distranĉi ŝnurojn de malamika ŝipo, kiel tranĉilo. Por tio ambaŭ kanonoj devis pafi kune.

— Tiu utila amuzo ne povas ne plaĉi al lia cara moŝto! — diris James, akompanante la boaton. — Kaj kiam vi rimarkos,

ke la siro venis al bona humoro — tuj komencu...

Petro Aleksejeviĉ kun intereso ĉirkaŭiris la kanonojn, pririgardis, kiel ĉio estas aranĝita, poste ordonis komenci pafadon. Oni pafis dudek tri fojojn, sed la ĉenoj ne disvolviĝadis, kaj la multekostaj kuglegoj dronadis en Dvino.

— Ne, tiele ne taŭgas! — diris la caro. — La tutan pulvon vi eluzis, sed ĉion sen utilo...

Kaj li sidiĝis sur herbon por ripozi. Urquhart eksidis apude, plendis pri siaj problemoj, pri tio, ke komerci kun Moskvio estas malfacile, kvazaŭ doganistoj faras grandajn embarasojn. Jen antaŭnelonge dogana leŭtenanto Krikov deklaris al li konfuzon, pro kio okazis nemalgranda malprofito. Multaj negocistoj hodiaŭ venis ĉi tien lastfoje. Jen la caro ordonas transporti ŝipan ŝnuraron, sed kian tio faros profiton, se ĉiuj prenas ŝmirmonon...

Petro abrupte levis la kapon, ekrigardis al la ŝipestro.

— Kiuj — ĉiuj?

— Certe, — daŭrigis Urquhart, ne respondante la demandon, — certe, tiu ĉi kanono ne estas tre bona, eblus liveri pli bonan, sed leŭtenanto Krikov sciu sian lokon kaj ne malhelpu prosperon de komerco inter ŝtatoj...

Ievlev atente aŭskultis, intencis respondi al la ŝipestro, sed Petro Aleksejeviĉ ĵetis al li tian rigardon, ke Silvestro Petroviĉ ne diris eĉ vorton.

— Ĉu tion la ŝipestroj ekzakte scias, ke leŭtenanto Krikov prenas ŝmirmonon?

Urquhart ridetis:

— Ne pli malfrue ol hieraŭ li ricevis de unu ŝipestro tri orajn monerojn. Pri tio povas konvinkiĝi ĉiu deziranto, ĉar la menciita de mi ŝipestro havas kutimon aŭ eĉ kapricon marki ĉiun apartenantan al li ormoneron per sia signo...

Petro abrupte leviĝis:

— La tri ormoneroj same estas markitaj?

La ŝipestro klinis la kapon.

Por Krikov oni sendis ekspresojn, al kolonelo Snivin estis ordonite trovi la ormonerojn kun markoj.

Urquhart ekparolis pri alio, Petro aŭskultadis distrite, videblis, ke li estas en furiozo.

Dum iris la konversacio, sur la Mosea insulo aperis ankoraŭ akaparisto — Chantré, tiu, kiu el Arĥangelsko iradis ĝis Vologdo, kaj iam eĉ ĝis Moskvo kaj ĝis Astraĥano mem. En mallongaj kaftanoj, longakruraj, en pufaj pantalonoj, kunvenis preskaŭ ĉiuj negocistoj-ŝipestroj kaj ĉiuj kun plendoj pri la doganejo kaj pri Krikov. Laŭ iliaj vortoj rezultis, ke komerci kun Moskvio nun tute ne eblas. Iom malfrue venis la eskortuloj — Garrit kaj la dua, ebrieta, — alveturigis donacojn: grenadojn, aparaton por brulgravurado, fajfilon por fajfi urĝosignalon. Germano Francisko, servisto de akaparisto Chantré, same estis ĉi tie, staris malproksime, kaŝinte por okazo sian triopan skurĝon.

— Ĉu nun pereos Atanazio Petroviĉ? — demandis Rjabov mornan Ievlev-on.

Ievlev ne respondis — per rapidaj paŝoj preteriris.

Francisko estis pasumanta malantaŭ la dorso de Rjabov —

tien kaj reen, kiel maŝino. Lia sata vizaĝaĉo brilis de graso, la ŝuoj knaradis, la okuloj rigardis malbrile.

— Kial li promenas? — demandis la rudristo obtuze. — Iradas, paŝadas!

La germano palpebrumis, purigis la nazon.

— Promenas! — ree diris Rjabov, forturniĝinte de Francisko. — Kvazaŭ vere sur sia tero. Fraĉo...

Ievlev malleviĝis al la akvo mem — iradis tien kaj reen, atendadis miraklon: se la markitan monon oni ne trovos, se ĉio aranĝiĝos kaj ne estos malfeliĉo al la kuraĝa dogana leŭtenanto.

Sed la malfeliĉo venis.

Kolonelo Snivin elgrimpis el la boato; anhelante, leviĝis al la caro, etendis sur la manplato tri ormonerojn. Petro tiris la buŝon, strabigis la okulojn, kriis:

— Knuti senkompate, elŝiri la nazotruojn...

Apraksin, metinte la manon sur la kubuton de Petro Aleksejeviĉ, petis permeson diri vorton. Petro ne deziris aŭskulti. Al la bruo alvenis Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov, prononcis kun suspekto:

— Ĉu kalumnii ruson por siaj profitoj la negocistoj ne povis?

Petro ekrigardis al Menŝikov, silente nee skuis la kapon. Aleksandro Daniloviĉ kaj Apraksin interŝanĝis rigardojn. Petro staris dorse, rigardis al Dvino.

— Hontinde! — subite prononcis li. — Hontinde, amare...

Antaŭ la tagmanĝo la kolero de Petro Aleksejeviĉ iom malvarmiĝis. Apraksin kaj Menŝikov per du voĉoj sukcesis rakonti al la caro, ke Krikov faris multe da utilo al la fisko, kaj pro tri ormoneroj elŝiri nazotruojn kaj knuti senkompate — ĉu ne estos tro severe? Ke hontinde kaj amare — tio estas tute vera, sed ja multaj ŝtelas, kiu en tiuj aferoj estas sen makulo?

— Ja vi estas la unua kun makulo! — diris Petro Aleksejeviĉ al Aleksandro Daniloviĉ.

Menŝikov ofendiĝis; kunmetinte la lipojn en formo de koro, komencis flari floron.

Atanazio Petroviĉ estis alkondukita, kiam la caro kun la gastoj estis tagmanĝanta. Tirante sian ŝultron, Petro ekstaris de la tablo, eltrenis Krikov-on en la vestiblon, tie, alpreminte al la traba muro, enrigardante en la miregantajn, larĝe malfermitajn okulojn de la leŭtenanto, kun furiozo demandis:

— Kion vi faras, latrono! Ni komercon iel-tiel nur komencas, en grandaj penoj, kun suferoj, sed vi...

Li ĵetis lin flanken kaj revenis al la tablo, kie estis gajantaj fremdlandaj ŝipestroj kaj negocistoj. La gastoj tuj komprenis, ke tro gaji ne indas.

— Iru! — ordonis Petro al Romodanovskij. — Elbatu stultecon el lia kapo, donu lecionon por ĉiam, ke li ne ŝtelu...

Viŝinte la grasan buŝon, metinte la harojn post la orelon, la princo-regento paŝis en la vestiblon, puŝis el tie sur la peronon la nenion komprenantan leŭtenanton, etendis al li siajn potencajn mallongajn brakojn, kaptis lin je la ŝultroj kaj batis tutforte kontraŭ la doma muro...

— Kial vi batas? — kriis Atanazio Petroviĉ.

Romodanovskij batadis silente, ne dirante eĉ vorton, batadis, ne sciante pro kio, pro kia kulpo, batadis tial, ke tiel estis ordonite.

Preskaŭ senkonscian Krikov-on el la manoj de Romodanovskij elŝiris Ievlev. Kuŝigis apud la perono, malrapide turnis la rigardon al la princo-regento, mallaŭte diris:

— Por kio vi tiel faras, princo?

La princo-regento viŝis la manojn je la basko de la kaftano kaj, ofte spirante, revenis en la ĉefĉambron, verŝis por si medon, avide eltrinkis.

Ievlev, pala, kun tremeganta makzelo, levis Krikov-on, kondukis lin flanken, en betularon. Tie, strange ridetante, staris Rjabov. Sub malgranda pluveto, en malaltaj betuloj, priteksitaj per araneaĵoj, li viŝis al la leŭtenanto la vizaĝon, kuris al Dvino, alportis en ĉerpilo akvon. Krikov silentis, plorsingultadis, etaj larmoj fluis laŭ lia vizaĝo.

— Jen kio, sinjoro, vi aŭskultu, — subite ekparolis la rudristo, tirante la manikon de Ievlev, — ni, homoj Blankmaraj, al tiaj aferoj ne kutimas. Se nin iu batas, tiu mem estos batita...

Ievlev kriis al li. Li eksilentis.

Tra la betularo kun ĥirurgia provizo estis singarde paŝanta la kuracisto Van der Gulst.

— Al diablo! — kolere eldiris Krikov. — Al diablo ĉiujn fremdulojn! Al diablo!

Kaj forpuŝis la alvenintan al li kuraciston.

Sed Van der Gulst tamen donis al li flari trankviligan salon

kaj ŝmiris la gingivojn per hinda balzamo, pro kiu devis firmiĝi la ŝancelitaj dentoradikoj.

— Kio estos nun? — demandis Krikov, kiam la kuracisto foriris.

Ievlev ne respondis.

— Kaj mi ne tre bezonas! — eldiris la leŭtenanto. — Mi iĝos fiŝisto. Ĉu vi prenos min, Ivano Sabateiĉ?

— Boaton ni ne havas... — respondis Rjabov.

— Kaj mi ne tre bezonas! — ripetis Krikov, aŭskultante neniun.

Ili sidis en la betularo ĝis krepusko duope — Rjabov kaj la leŭtenanto. Pluveto estis egalmezure verŝiĝanta super la Mosea insulo, super Dvino, super la jaĥto. Sur fremdlandaj ŝipoj estis ludanta muziko, al la insulo unu post alia venadis boatoj, kunveturadis gastoj. Alnavigis la barko de ĉefepiskopo Atanazio, Baĵenin-oj alpelis ŝalupon de Vavĉugo, dum Krikov kaj Rjabov plu estis konversaciantaj malrapide: unu diras — kaj silentas, alia diras — kaj same silentas.

— Sur la jaĥto ja ferdekestro Robles iros kiel ŝipestro, — diris Rjabov. — Ĝuste tiu, kiu min estis murdanta...

— Kaj vi?

— Kaj mi — kiel matroso...

— La ŝipanaron ili do kie akiros?

— Rekrutigos. La afero ja estas simpla...

Ili silentis iom.

Rjabov mordis herberon, suspiris:

— Metrion la patroj monaĥejaj kaptis kaj enkeligis.

— Mi aŭdis.

— Kiel el tie lin elpreni?

— Pensi necesas.

— Kiom mi pensas — nenion elpensis. Ne lin solan ili enkeligis. Ĉiujn fiŝistojn de la monaĥejo...

Ili eksilentis por longe.

Volviĝante en mantelon, venis Silvestro Petroviĉ, alportis sub la mantelo panon, frititan fiŝon, anseron.

— Kio estos? — denove demandis Krikov.

Ievlev respondis ne tuj, videblis — estas malfacile respondi.

— Ĉu ili forgesis pri mi? — demandis Atanazio Petroviĉ.

— Ne, ne forgesis. Estos vi, leŭtenanto, kaporalo!

Krikov salte ekstaris, kriis:

— Degradis? Por ilia ĝojo — de fremduloj-ŝtelistoj?

— Vi prefere ne bruu! — konsilis Ievlev. — Kvietiĝu dume. Poste ni vidos. Eble, post paso de tempo ni elpetos... Nun estas senutile peti, li tro koleras. Mastro Atanazio penis protekti — tio ne helpis...

Krikov ree eksidis, enpensiĝis. Ievlev konsoladis lin, tiu kvazaŭ ne aŭskultis. Poste, ne adiaŭinte, foriris.

— Atanazio Petroviĉ! — kriis post li Rjabov.

Sed la eksleŭtenanto ne respondis. Li iris tra la betularo — oblikve, anhelis, ĉiam pensadis unu kaj saman penson: «Kiel tio okazis? Pro kio? Kiel vivi nun?»

Rjabov ekiris post li, ankoraŭfoje vokis, Krikov ree ne respondis.

La pluveto ĉesis, apud la palaco oni estis farantaj artfajraĵojn, en la griza ĉielo sibladis serpentoj, ĵetiĝadis drakoj; krakante, snufante kaj kraĉante, turniĝadis koloraj radoj. Ŝipestro Urquhart, gaja, grasvizaĝa, tre kontenta pri la atingitaj dum unu tago venkoj, kun meĉa torĉo en la mano staris ĉe la perono. Rjabov longe, sen palpebrumi, rigardis al li, poste trovis Ievlev-on kaj petis:

— Silvestro Petroviĉ, helpu!

— En kio?

— Havas mi unu knabon, kvazaŭ kamaradon. Li estas kriplulo, lamulo. Prenis lin la damnitaj monaĥoj, ĵetis en la kelon por ĝismorta sidado. Kun li estas monaĥejaj fiŝistoj, kuraĝa popolo, spertaj maristoj...

— Kaj?

— Liberigu ilin per la cara nomo. Kiam ni en la maron iros — vi rememoros. La fiŝistoj estas la plej bonaj, kaj al la fremdlandanoj vi ne esperu. Ferdekestro Robles, se batos tempesto, nin ĉiujn dronigos. Nian maron koni necesas...

— Kial vi min, rudristo, timigas? Mi ne estas timema, — ridetante en mallumo, diris Ievlev.

— Mi ne timigas — veron diras. Mi tiel pensas, ke la afero al tempesto iras...

— Pro kio vi pensas?

— Laŭ antaŭsignoj, Silvestro Petroviĉ. Sur la tero ja ni ĉiuj estas bravuloj, sed kiam la maro batos, tiam ni vidos. Veron mi

diras...

Ievlev silentis. Ree en la ĉielon kun siblado kaj hurlado impetis vosta kometo, ekturniĝis tie kaj eksplodis je steletoj.

— Liberigu! — insiste petis Rjabov.

Ievlev pensadis, ne respondadis.

— Se vi ne liberigos — mi ne iros kun vi en la maron! — mallaŭte, sed kun minaco en la voĉo diris Rjabov. — Tiam por vi Robles rudru. Kaj kiel vi reen iros? Ĝis la kolo li estos kun vi, sed reen? Reen kiu?

Li subridis:

— Ĉu Antipon Timotejev-on vi prenos? Li estis bona rudristo, sed nun li estas timema supermezure...

— Vi kun ni iros! — potence diris Ievlev.

— Ĉu sen volo?

— Eĉ tiel.

— Ne okazis al mi tiel kaj ne okazos, Silvestro Petroviĉ! — diris Rjabov trankvile kaj nelaŭte. — Ne tia mi naskiĝis al la mondo!

— Alian rudriston ni trovos! — respondis Ievlev. — Vi mem antaŭnelonge diris, ke multe estas ĉe vi maristoj ne pli malbonaj ol vi...

— Kaj se subite pli malbonaj? — kun subrido demandis Rjabov. — Ĉu? Kiel tiam?

Kaj ekridis tiel sincere kaj gaje, ke la koro de Ievlev varmiĝis.

— Bone! — diris li. — Mateno donas sagacon.

— Sed eble, ni ĝuste nun iros? Nokte estas bone! Ni tuj la tutan aferon farus...

Per la varmega polmo li kunpremis la pojnon de Ievlev, tiris la tablestron al si kaj rapide flustre ekparolis:

— Ja al vi estas ordonite matrosojn rekrutigi, kaj tie estas tiaj maristoj, ho-o-o!.. Via moŝto, sinjoro, por kio prokrasti? Boaton ni havas, soldatojn vi prenos ĉirkaŭ kvin homoj, facila afero, ĉu? Simplega afero! Sinjoro, ja ni momente tie sukcesos, vento estas freŝa, sub velo! Kaj kia popolo, — tian popolon vi ne trovos, sinjoro, kun tia popolo ne nur en la oceanon sen kompaso vi povas iri, kun tia popolo eĉ droni estas gaje...

Li ree ekridis per sia bonkora rula rido, ree tiris la tablestron je la mano, aldonis verve:

— El karcero homojn liberigi — ja kia bonega afero! Pordojn ferajn antaŭ ili malfermi! Ĉu? Vodkon doni al ili drinki po gluto, per ansero almanĝi. Ja tiaj homoj post vi eĉ en la inferon mem iros sen duboj, je Dio, veron mi diras...

Ievlev elŝiris la manon kaj rapide ekpaŝis al la palaco, kaj Rjabov ekkuris en la betularon, prenis tie la volvitan en baston manĝaĵon kaj komencis haste prepari la boaton...

La ĉefepiskopon Vagan kaj Ĥolmogoran Ievlev trovis ludi ĵetkubojn kun eksterlandaj eskortuloj. Ĉirkaŭe fumis pipoj, oni trinkis kaj manĝis stare, interpuŝadis. Trairi al la episkopa moŝto estis malfacila afero.

— Nu, kion? — turniĝinte al Ievlev, malkontente demandis Atanazio.

La ĵetkuba ludo plaĉis al li, li ĵus komencis kompreni ruzaĵojn de Golgolsen, kaj subite oni distris lin.

— Ĉu la langoforsekiĝis?

Ievlev flustre klarigis sian aferon.

— Sed por kio ili subite eknecesis, nokte?

— Maristoj bonegaj, kaj la granda ŝipestro ordonis, ke por morgaŭ la jaĥto estu ekipita...

La ĉefepiskopo prenis la barbon en la pugnon, ŝovis ĝin en la buŝon, mordis, pensis iom, poste ordonis:

— Je mia nomo ordonu al Agafoniko la enŝlositojn al vi fordoni por ŝtata bezono. Kaj fortajn medojn monaĥejajn li al la cara tablo sendu, ne avaru... Iru kun Dio!

Ievlev alkroĉis la spadon, metis en la sakon pistolojn, ordonis al la kolonelo sendi al la boato soldatojn — ne pli ol kvin, kaj kun tamburo — por timigo. Rjabov estis staranta ĉe la bordo, larĝe dismetinte la piedojn, atendis...

— Nu? — demandis li, kiam Ievlev aliris tute proksime.

— Tuj la soldatoj venos.

— Tiele! — respondis Rjabov. — Iru, Silvestro Petroviĉ, sidiĝu sur tiun benketon, por vi tie estos pli oportune.

Ievlev eksidis, envolvis sin en mantelon kaj tuj ekdormetis pro laco.

7. Malliberuloj

Nelonge antaŭ la mateno ili leviĝis sur la holmeton, interkonsiliĝis flustre, aliris la monaĥejan pordegon, kaj la tamburisto per ambaŭ bastonetoj ekbatis alarmon. En griza antaŭaŭrora nebulo obstine, kolere batadis la tamburo, vekante el dolĉa dormo la monaĥojn, la prioron, la ekonomon, la

novicojn, la monaĥejajn servantojn. Raŭke, sufokiĝante pro furiozo bojis la monaĥejaj ĉenhundoj, trans la alta muro ekkuris monaĥoj, knare malfermiĝadis la pordoj de ĉeloj.

Ievlev, mordante la lipon, per la tuta forto bategadis per la botoj la feritan rustan pordegon...

Finfine malfermiĝis luketo en la pordego, la barbokovrita pordegisto demandis timigite:

— Kiaj homoj?

En alia luketo, pli alta, aperis arkebuza tubo, el trans la muro apud la pordega turo elŝoviĝis kun halebardoj en la manoj la monaĥejaj batalistoj — Barnabo, Kornelio kaj Filoteo. Maldekstre — surdmuta maljuna novico Kuĥrja kun ĝemoj trenis la monaĥejan kanoneton. La soldatoj de la Preobraĵenska regimento[61], starantaj ĉe la pordego, ridis, — tre gaje estis rigardi, kiel la Diaj homoj prepariĝas al batalo.

Ievlev severe, dise, por ke ĉiu vorto estu komprenebla, ordonis la pordegon malfermi sen ajna prokrasto. La nomo de mastro Atanazio, la standardeto, flirtigata de la antaŭmatena venteto, la pribrulitaj per pulvo de ludbataloj severaj vizaĝoj de la soldatoj, krakado de la tamburo, la cara oficiro — ĉio kune donis tian timon al la monaĥoj, ke tuj ekknaris la rigliloj, la pordegisto formetis la trabon kaj ektiris la ĉenon. Malrapide malfermiĝis la pordego. En monaĥa cilindra ĉapo, malalta, kun elstaranta antaŭen barbeto, apogiĝante sur bastonon, staris meze de duonrondo el monaĥoj la prioro, kolere rigardis al Ievlev, al la soldatoj, al Rjabov. Estis sekundo — iliaj rigardoj

61 La regimento, formita de Petro I en 1690 el ludsoldatoj de vilaĝo Preobraĵenskoje (kies nomo devenas de la kristana festo Transfiguriĝo), konserviĝis ĝis la 20-a jarcento. *(trad.)*

interkruciĝis: la hela trankvila rigardo de la rudristo kaj la fajranta per kolero rigardo de la prioro. La prioro ne eltenis — forturniĝis. Rjabov subridis pigrete.

Batinte per la apogbastono la teron, la prioro kriis per maljunula malforta voĉo: por kio la senhontuloj rompas trankvilon de la monaĥejo. Sed Ievlev tiel ĉitis, ke la maljunuleto eĉ retiriĝis kaj svingis la diafanajn polmojn. Ne petinte benon, ne krucosigninte la frunton, Ievlev ekiris antaŭen, al la monaĥoj, per la ŝultro dispuŝis du dikajn kvasistojn, per manmovo formetis de sur la vojo Barnabon kaj ordonis malŝlosi la karceron.

Rjabov elkaptis el la harkovritaj manoj de Filoteo peĉan torĉon, alte levis ĝin. Malalta lerta preobraĵenskano Konoplev, sukcesinte trovi rompostangon, kun la radikoj komencis elturni krampon sur la pordo de la malliberejo. Kaj por ke la nigra frataro timu pli forte, la tamburisto Nejelov ĉiam batadis kaj batadis la tamburon, ŝanĝante alarmon al matensignalo kaj matensignalon al alarmo.

Finfine, ĝuste kiam patro ŝlosisto alportis la ŝlosilojn, la krampo estis elrompita, kaj Rjabov la unua paŝis antaŭen, en la subteraĵon. Nur por sola momento lia vizaĝo tremeris, li ekspiris pli ofte, sed tuj retenis sin kaj, alte tenante super si la torĉon kun nigra kresto de fulgo super la oranĝa flamo, per rapidaj fortaj paŝoj ekiris antaŭen sur glitaj malsekaj ŝtonoj. Malantaŭ li ĉe lia ŝultro mem kun bruo kaj tondro batadis la tamburo, fere tintadis la muskedoj de la preobraĵenskanoj, retenante la spadon, estis paŝanta Ievlev. Pro ĉio ĉi Rjabov kvazaŭ flugis, kaj tia subite senegala forto aperis en li, ke li per la ŝultro puŝis la pordon, grakis, enpremis internen de la

kamero, en obskuron, la rustintan, forputrintan feron kaj la ronĝitan de vermoj lignon. Kaj preskaŭ falis sur rampantajn ĉirkaŭ li, blindigitajn pro la torĉo, pro brilo de la armilaro, surdigitajn per la tamburado malnovajn kaj bonajn amikojn, laborulojn de la Blanka maro, tuj rekonintajn lin, Rjabov-on Ivanon filon de Sabateo...

— Ivano! — aŭdiĝadis el la humida fetora obskuro.

— Rudristo!

— Amiko bona!

— Homoj, levu min, la piedoj ne iras...

— Ho panjo, ĉu tio ŝajnas al mi...

— Ivano, ĉu tio estas vere vi?

— Mi, mi, — hele kaj larĝe ridetante, diradis Rjabov, sed liaj okuloj estis serĉantaj la laman Demĉjon, serĉadis kaj ne trovadis.

Kaj de ĉie aŭdiĝis:

— Ĉi tie li estas — via kriplulo...

— Plue estas kamero, lin solan ili sidigis...

— Iru al li, iru...

Lardofandisto Ĉernicin eklamis antaŭen sur la ŝvelintaj piedoj, avo Teodoro kriis postsekve:

— En la suba kamero li estas, en la plej fora, la suba...

Ĉi tie Rjabov per la rompostango deŝiris la ŝlosilon, Demĉjo flanke mallerte paŝis al la rudristo, alpremiĝis al la ŝultro, plorsingultante, ripetadis:

— Oĉjo, oĉjo...

— Jen, vere, oĉjo! — severe respondadis Rjabov. — Oĉjo!..

Kaj subite, en kolero, ekkriis:

— Kaj vi de mi ne deiĝu! Tro saĝa, jen, troviĝis! Sen mi deziris vivi. Bone vivis en la kamero, ĉu?

Kiam ili eliris el la fora ĉelo, Ievlev en lumo de torĉo per funebraj okuloj pririgardadis la estontajn matrosojn de la cara jaĥto. Forkonsumitaj, malpuraj, barbaj, iu ŝvela, iu sendentiĝinta — la homoj treniĝis per malgaja vico, kaj estis malfacile kredi, ke ili ankoraŭ ŝercas pri si, subridas, kiu el ili estas pli malbona, spritas pri sia malfeliĉo.

— Vi ne rigardu, Silvestro Petroviĉ, ke ili apenaŭ rampas, — diris Rjabov al la tablestro, — vi nian popolon ne konas. Ilin necesas unue en ŝvitbanejo varmigi, per kreno iliajn korpojn froti, kaj poste ankaŭ manĝon doni, tamen ne senlime, sed kun gardo, por ke ne ŝvelu la malplena ventro, kaj ne unufoje kun gardo, sed du, tri...

Ievlev, ne disigante la lipojn, subridis al la rudristo, malfideme balancis la kapon.

— Poste, certe, freŝan gadon al ili, rafanon kun oleo, panon kiom ili deziros, kaj oksikokon. Oksikoko, vakcinio, ankoraŭ pinaj pingloj brogitaj, — kaj estos bone...

— Ĉu ĉiuj postvivos?

— Nu, eble, iun ni al tombejo portos, — respondis Rjabov, — sed aliaj postvivos.

— Sed ni ja atendi ne povas, ni devas iri en la maron! — kolere diris Ievlev.

En flagranta lumo de la torĉo la okuloj de la rudristo brileris

ruze. Li glatigis per la polmo la mallongan orkoloran barbon kaj sen hasto diris:

— Se iri, do iri! Por la unua iro ni eĉ sen ili sukcesos!..

— Kio? — demandis Ievlev, ne kredante al la propraj oreloj. — Ja vi mem antaŭ nelonge diris — sen ili ne vidos ni maron...

— Ne gravas, — flanke rigardante al la tablestro, singarde respondis Rjabov, — kaj de kie mi povus scii, en kia ili estas malbona stato... Vidu, kiel mortintoj, kiaj el ili nun estas matrosoj. Nura malfeliĉo! Kaj aliflanke, sinjoro, kiel ĉe ni la popolo inter si esprimas: «Ĉi tie ĉelo estas ĉerko — se la pordon fermi. Kaj se malfermi, tiam — fino!»

Kaj, ekridinte rule, li sen ajna ĝentileco kun forto tiris Ievlev-on al la libero — tien, kie lumis la kvadrato de la pordo, trahakita en la malliberejon. Ĉi tie la preobraĵenskanoj jam trovis monaĥejajn rondpanojn, sunsekigitan fiŝon, kruĉojn da kvaso kaj, en lumo de la venanta tago, pike ŝercante, regalis la monaĥejajn malliberulojn. Rudristo Semisadov, sen avideco, diligente, je malgrandaj pecoj rompante rondpanon, disdonadis al la siaj, por ke ili ne tromanĝu post la malsato.

Jam preskaŭ tute tagiĝis. Monaĥeja servisto — paŝtisto Jegorĉjo[62] — per longa knuto batadis sen rigardoj la monaĥejan bovaron, pelante ĝin sur la paŝtejon. Dormeme kaj malkontente muĝadis la bovinoj. Kvazaŭ freneziĝinte, saltadis sur la korto, levinte la vostojn, du rufaj bovidinoj. La monaĥoj elmalproksime rigardis al la soldatoj, fumantaj tabakon en la

62 Jegoro (Егор) estis popola formo de la nomo Georgo, same kiel ankaŭ Jurio (Юрий), sed ambaŭ variantoj delonge estas perceptataj kiel malsamaj nomoj (komparu kun germana nomo Jürgen), tial mi preferas esperantigi ilin laŭlitere, sed ne kiel Georgo. *(trad.)*

monaĥejo, al la kolera pala oficiro en Preobraĵenska kaftano, al la larĝŝultra orhara rudristo Rjabov, al la malliberuloj, perdintaj ajnan timon kaj sakrantaj kun la preobraĵenskanoj. Kaj Jegorĉjo-paŝtisto, kvazaŭ sorĉita, ĉiam pli kaj pli proksime aliradis la monaĥejajn malliberulojn, serĉadis, demandadis ĉiam pli laŭte:

— Ĥagajo? Ĥagaĉjo? Ĥagajo nia kie?...

— Ĉi tie li estas, fraĉjo via! — diris Rjabov. — Ĉi tie, viva, jen, ekdormis en libero...

Kaj puŝis Ĥagajon, por ke tiu ekĝoju pri la renkontiĝo kun la frato. Ĥagajo malfermis la okulojn, oĥis, ne ekstarante de la tero etendis la manojn al Jegorĉjo.

— Ĉu vi vivas?

— Vivas! — ridetante al la frato kaj plorante pro kompato al li, ke li tiel magriĝis kaj nigriĝis, respondis Jegorĉjo. — Mi vivas, Ĥagaĉjo...

— Kaj mi nun jen vivas! — diris Ĥagajo. — Ĉu vi vidas, kiel?

— Jegoro, he, Jegoro! — vokis la knabon Rjabov.

Tiu turniĝis, plu tenante sin je la frato.

— Iru kun ni kiel matroso! Ĉu vi deziras en nian brigadon? Jen kompanio estos — granda!

Jegorĉjo malforte ridetis.

— Via avo estis rudristo, la patron la maro forprenis, — jam sen rideto diris Rjabov. — Via frato estis bona maristo. Por kio vi ĉi tie paŝtu brutaron? Ĉu vi estas sklavo ilia? Ili eble vin iam en subteraĵon metos, jen kiel Ĥagajon...

La bovinoj estis muĝantaj apud la fermita monaĥeja pordego, frapadis per la kornoj la triverŝokajn pinajn tabulojn, petadis irigi ilin en la kampon. Jegorĉjo ilin ne vidis. Ne vidis li ankaŭ la patron ekonomon, elirintan sur la peronon de sia ĉelo kaj kolere aŭskultantan, kiel delogas la malbenita rudristo la monaĥejan paŝtiston.

— Aŭ vi timema iĝis? — demandis Rjabov. — Kial do? Ja estis tempo, mi vin tute malgrandan memoras, — iradis vi kun mi dum granda burasko kaj tute ne timis. Ĉu vere, Ĥagajo? Kaj kun vi li iradis kaj kun Semisadov. Ĉu tiel, Semisadov?

Semisadov, maĉante pankruston, kapjesis. Ĥagajo konsilis:

— Li mem pripensu, Ivano Sabateiĉ, li pli bone scias.

— Nun vi, Jegoro, kiom da jaroj aĝas? — demandis Rjabov. — Eble, dek ses? Vi estus brava maristo! Nu, kial paroli, se tiel...

Kaj li forturniĝis al la leviĝantaj por ekiro eksaj malliberuloj de la Nikola-Korela monaĥejo. Ree ekbatis la tamburo, la pordegisto ekknaris per la ĉeno. Ievlev atendis, kiam foriros la grego, kaj elkondukis la homojn sur la Dvinan bordon. Ĉe la barko, sur argila deklivo, Rjabov donis al ĉiu po gluto da vodko. Post tio ili almanĝetis anseron. Avo Teodoro, sidiĝante en la barkon, levis la manon por krucosigno al la monaĥejaj bulbaj kupoloj, sed sub rigardo de Rjabov mallevis la manon kaj eĉ kraĉis.

— Jene! — eldiris la rudristo. — Al sia morta karcero li krucosignas. Maljunas oldulo, sed racion ne akiris...

Li kraĉis al la manoj, prenis remilon, por depuŝiĝi de la bordo, kaj haltis.

Sur la glita argilo, jen sinkante, jen glitante, kvazaŭ sur glacio, kuris Jegorĉjo — en bastoŝuetoj, kun la knuto en la mano.

— O-oĉjo, atendu-u! Oĉjo, atendu min...

— Ni atendos! — subridis Rjabov.

Kalcitrinte per la bastoŝuoj, Jegorĉjo de sur la deklivo saltis rekte en la boaton kaj, sufokiĝinte pro la kurado, demandis:

— Ĉu vere, kiel maristo?

— Vere, infaneto, — per bonkora voĉo respondis Rjabov. — Estos vi nun de la mara metio laborulo!

Kaj, turniĝinte al Ievlev, diris:

— Lia nomo estas Jegoro, kaj familinomo Pustovojtov. Lerta, sprita, timon en la maro ne scias. Ĉu taŭgas por la jaĥto, Silvestro Petroviĉ?

— Taŭgas! — klare rigardante en la okulojn de Jegorĉjo, respondis Ievlev. — Kaj ne nur por la jaĥto. Eble, ni grandan ŝipon konstruos, iros vi sur ĝi al malproksimaj maroj...

Jegorĉjo silentis. Silentis ankaŭ la aliaj — eksaj malliberuloj — fiŝistoj, rudristoj, lardofandistoj, ĉasistoj. Silentis ankaŭ Demĉjo Goroĵanin, sendeŝire rigardis al Jegorĉjo: tiu havos grandan navigadon. Sed li? Li, Demetrio?

— Levu do la velon, viroj! — kriis subite Rjabov. — Tuj! Ĉu vi la venton ne sentas?

Vento de la maro — odoranta, sala, gaja — vere kovris per hulo la grizajn Dvinajn akvojn, eksusuris per arbustaro sur la bordo, ekludis per maldika betulo. La barko kliniĝis sub la vento, la rufa suno priverŝis la oblikvan velon per varma lumo.

Rjabov premis la rudron kaj kondukis la ŝipeton al la malproksima Mosea insulo...

Ievlev rigardis antaŭ si kaj pensis.

Kaj ju pli li pensadis pri la homoj, kiuj estis sidantaj malantaŭ lia dorso kaj babilantaj, spritantaj, ŝercantaj, des pli varma iĝadis lia koro.

8. Trafis falĉilo sur ŝtonon

Kiam la barko de Ievlev, transportinte la liberigitajn prizonulojn en Arĥangelskon, albordiĝis al la varfeto, konstruita kontraŭ la palaco, ŝipestro Urquhart, pasiginta la nokton kiel gasto en la cara apartamento, estis malrapide pasumanta sur la bordo kaj fumanta pipon, meditante pri tio, kiel ankaŭ hodiaŭ li pasigos por sia utilo la tutan tagon...

Salutinte la caran tablestron, la ŝipestro silente kaj afable atendis, kiam la pala bluokula oficiro eliros sur la bordon, por konversacii kun li, sed Ievlev, evidente, ne inklinis konversacii, rigardis per malplenaj okuloj en la rondan vizaĝon de la ŝipestro kaj silentadis, dum tiu esprimiĝadis pri vetero kaj pri agrableco de matenaj promenoj en tiuj horoj, kiam la aero ankoraŭ estas tute freŝa kaj plena de aromoj de herboj, kaj ankaŭ — de malfermiĝantaj renkonten al Febo floroj.

— Ni lasu Febon, — sen ajna ĝentileco en la voĉo prononcis Ievlev, — sed kial viaj homoj, sinjoro, drinkigas iujn niajn per malica trinkaĵo kaj, pensante, ke ebriigis, ĉian maljustaĵon kun ili faras kaj elesploras, kie kiajn ŝipojn ni konstruas, kion konstrui intencas, kiel pri kio ni pensas kaj meditas?

Urquhart viŝis la humidiĝintan vizaĝon kaj ĵus elpensis, kion respondi, kiam Ievlev ree kaj eĉ pli malĝentile, ol antaŭe, demandis:

— Ĉu konata de vi, sinjoro, estas la nocio — informisto, aŭ spiono? Ĉu vi ne estas kaŝsendito, sinjoro? Ĉu ne por tio vi maskeradon negocistan uzas, ke por via ŝtato ricevi necesajn por vi informojn kaj per tio al via potenculo servi? Ĉu ne estas vi, sinjoro, militserva homo?

— Sinjoro! — ekkriis Urquhart.

— Sinjoro! — jam tute severe respondis Ievlev. — Sinjoro, mi disponas informojn, kiuj povas esti sciigitaj en ajna minuto al mia monarĥo, kaj tiam via fortuno turniĝos al vi dorse kun tia rapido, ke vi eĉ preĝi ne sukcesos antaŭ morto.

Al la ŝipestro ektremetis la mentono, li deiris je paŝo kaj per voĉo, plena de ofendita digno, demandis:

— Sinjoro, se vi ne ŝercas, tiam...

— Tiam?

— Lia sanktoleita moŝto caro...

— Lia cara moŝto estos informita pri via metio senprokraste, tuj kiam li bonvolos vekiĝi. Tial, — firme daŭrigis Ievlev, — tial mi opinias kiel plej por vi bona neniam plu plenumi vian profesion, kiu estas multe pagata, sed kiu povas kosti al vi la kapon. Pri fiaĵoj kaj malicaĵoj de via hispana ferdekestro, kiun proponis vi kiel ŝipestron al lia cara moŝto, mi estis ĝuste sciigita. Ĉi tie, inter ni, troviĝas princo-cezaro Romodanovskij[63]. Ĉu vi aŭdis pri li?

63 Princo-cezaro — unika rango, elpensita de Petro I por Romodanovskij duonŝerce (Romodanovskij kvazaŭ rajtis doni rangojn al la caro mem).

Urquhart ree viŝis sin per fulardo, sur lia griza vizaĝo aperis grandaj ŝvitaj gutoj.

— Kiu ne aŭdis pri tiu glorinda grandsinjoro!

— La princo-cezaro, — daŭrigis Ievlev tiel malmilde, ke ne restis dubo pri vereco de liaj vortoj, — la princo-cezaro ŝerci ne ŝatas, ĉu vi scias pri tio? Kaj se vi ne forlasos por estonta tempo la ludon, kiun vi entreprenis, — la princo-cezaro mem okupiĝos pri via persono kaj faros tion tre lerte...

La ŝipestro penis majeste rideti, sed anstataŭ rideto lia vizaĝo mizere misformiĝis.

— Jen ĉio, kion mi havas por diri al vi, — elparolis Ievlev. — Nun direktu vin sur vian ŝipon kaj tie pensu en libera tempo, ĉu necesas por vi poste erari per nearĝenta arĝento, alveturigante ĝin en bareloj ĉi tien...

Tiam la ŝipestro sukcesis interrompi la tablestron. Stamfinte per la piedo en ŝuo kun banto, li komencis krii, ke lia cara moŝto en la hieraŭa tago mem bonvolis puni la kulpulon de la historio kun arĝento kaj ke li, Urquhart, al neniu permesos diskreditigi la caran ordonon...

— Mi diskreditigas vin! — ne levante la voĉon, plu kun kolera forto prononcis Ievlev. — Vin, sinjoro, kaŝsenditon, monfalsiston, kalumnianton kaj akapariston de sklavoj. Kaj al vi mi diras: iru tuj en ĉi minuto sur vian «Oran nubon» kaj sidu tie silente, ĝis ĉi tie estos decidite, kiel agi kun vi: ĉu elpeli vin tien, de kie vi venis, aŭ fordoni al princo Teodoro Jurijeviĉ sub lian manon, en la Kancelarion, kie torturmajstroj veran veron el

---

Romodanovskij Teodoro Jurijeviĉ (1640–1717) — ŝtata aganto, estro de la ŝtatsekureca servo (la Preobraĵenska kancelario), iam plenumadis devojn de persona ekzekutisto de Petro I. *(trad.)*

vi eltorturos...

La ŝipestro ektimis. Kaj, kvazaŭ intence, ĝuste en tiu ĉi tempo sur la peronon de la cara domo eliris la princo-cezaro, per la fingroj metante la harojn sur la orelojn, prisuĉante la malsekan lipharon, ĵetante rigardojn al matena Dvino, al barkoj kaj boatoj, starantaj ĉe la varfo, al soldatoj, kiuj estis kuirantaj likvan kaĉon sur la bordo.

Prokrasti ne endis. Kaj la ŝipestro, salutinte per la ĉapelaj plumoj preskaŭ sur la sablo, treninte la piedon, stamfis, frapinte ankoraŭ teron per la kalkanumo antaŭ la furioza oficiro, retropaŝis al sia boato, puŝis dormintan Ardeon, depuŝiĝis per hokstango kaj nur tiam, en libero, retrovis la normalan spiradon. Lia bonanima vizaĝo ŝanĝiĝis, la dikajn lipojn li kunpremis, la okuloj nun rigardis ne perplekse kaj timigite, sed kun seka moka kolero.

Leviĝinte sur la ferdekon de «Ora nubo», Urquhart per rapidaj paŝoj atingis sian kajuton, ordonis infuzi por si kafon pli fortan kaj voki tuj la ferdekestron.

— Se ankoraŭfoje vi ekintencos ion similan al tio, kion vi intencis pri la Granda Ivano, — per voĉo, tremanta pro furiozeco, eldiris la ŝipestro, — tiam al via interparolanto ne permesu foriri viva, ĉar ni ambaŭ, vi kaj mi, nun pendas sur fadeneto, ĉu vi komprenas? Sur maldika fadeno de morto en torturejo. Ĉu vi komprenas?

Del Robles silentis, ĵetante mokajn rigardojn al la timiĝinta ŝipestro.

— For! — kriis Urquhart.

La hispano eliris.

Urquhart prenis el skulptita ŝranketo flakonon kun trankviliga levantena balzamo, gutis en tason, eltrinkis kaj, forgesinte pri la kafo, veturis kun Ardeo sur la urban bordon, kie apud la muro de la Komerca korto estis promenanta larĝŝultra homo en nigra vesto de kuracisto — Des-Fonteines, kiel nomis lin Arĥangelskaj fremdlandanoj.

— Ĉu *herre*[64] ŝipestro estas afliktita de io? — moke demandis la kuracisto.

— Mi petas vin je la nomo de Dio: nenie kaj neniam nomu min *herre*! — petegis Urquhart. — Mia vivo estas en danĝero...

— Mi funebras kune kun vi, se estas tiel, kiel vi diras! — subridis la kuracisto. — Do, kio okazis?

La ŝipestro rakontis. Des-Fonteines kuntiris la ŝultrojn.

— Via ferdekestro deziris akiri favoron de la admiralo preter mi, — diris li trankvile, — kaj enkaptiĝis. Mi ne scias, kial bezonis grafo Gyllenstierna kontroli tiujn informojn, kiujn li ricevas de mi. Ĉu vi havis honoron konversacii kun la grafo en Stokholmo?

— Mi estis prezentita al li! — respondis Urquhart.

— Por kio?

— Grafo Gyllenstierna dubas pri tio, ke la moskvianoj konstruas floton. Ili konstruas ŝa-lu-pojn, — tiel bonvolis esprimi lia grafa moŝto...

Des-Fonteines silentis. Senvorte li malfermis antaŭ la ŝipestro la pordeton de sia korto. Du nigraj hundoj de dana raso montris la dentojn al Urquhart, Des-Fonteines karese fajfis al

64 «Sinjoro» en la sveda. *(trad.)*

ili.

En la hejmo de la kuracisto estis pure, odoris balzamoj kaj kuracaj herboj, sur la tablo staris kranio, apud ĝi du helicaj kandeloj. Urquhart foliumis libron en bovleda bindaĵo, kompateme demandis:

— Ĉu vi devis studi medicinon, *herre* ĉefleŭtenanto?

Des-Fonteines ridetis nur per la lipoj.

— La rango de kuracisto donas al mi eblecon esti ĉie, kie mi deziras, — respondis li. — Nun mi kuracas la fratojn Baĵenin, kiam ili malsanas, kaj ofte vizitas la novan ŝipkonstruejon en Vavĉugo. Sidiĝu, *herre* ŝipestro...

Urquhart eksidis en la oportunan fotelon. Kantobirdoj estis gaje interkriantaj en siaj kaĝoj, sunaj lumoj ŝanĝbriladis en kaheloj.

— Vi bone loĝas! — diris la ŝipestro.

— En mia domo nenio devas rememorigi min pri Moskvio kaj moskvianoj. Nenio kaj neniam. Mi penis tiel aranĝi mian loĝejon, ke almenaŭ la muroj kaj la meblaro ĉi tie rememorigu min pri nia bona Svedio...

Li subite demandis:

— Kia estas la sano de lia reĝa moŝto?

— Lia reĝa moŝto, *herre*, daŭrigu la Sinjoro liajn tagojn, ne tre bone fartas. Li estas tre malsana, kaj nur la providenco scias, ĉu mi vidos lin post la reveno...

— Ĉu tiel?

— Jes, tiel...

— Kaj kion oni diras pri la heredanto?

Urquhart verŝis por si helan bieron, dolĉe suspiris:

— Ho-o, *herre*, nia estonta reĝo plenigas per profunda ĝojo la korojn de siaj regatoj. Saĝaj homoj diras, ke eĉ nun videblas, kiel nia Karolo la Dekdua glorigos sian patrujon...

— El kio do tio videblas?

— Tio videblas antaŭ ĉio el la karaktero de lia princa moŝto. Tio, *herre* leŭtenanto, videblas el tiu senekzempla kuraĝo, kun kiu li ĵus antaŭnelonge trarajdis sur sovaĝa cervo la stratojn de nia glora ĉefurbo. Cetere, pri tiu cervo: ili vetis — princo Frederiko Holstein-Gottorp kaj nia brava Karolo. Tio ne estas ŝerco — rajdi sur sovaĝa cervo sur stratoj de Stokholmo, kaj des pli estante knabo...

— Jes, tio ne estas ŝerco! — serioze diris Des-Fonteines.

— Li estas tre, tre kuraĝa, nia estonta reĝo! — ekkriis la ŝipestro. — Oni rakontas, ke, ebriiginte per rejnvino sovaĝan urson, li batalas kontraŭ ĝi. Speciala atento de lia princa moŝto estas direktita al hardiĝo. Por tio li dum malvarmaj vintraj noktoj dormadas sur fojno en la ĉevalejo de sia palaco. Eĉ pli, *herre* leŭtenanto: la palaca servistaro rakontas, ke meze de profunda nokto li ekstaras de sia lito por kuŝiĝi sur la plankon en sola ĉemizo. Sur la ŝtonan, malvarman plankon...

La kuracisto ĵetis oblikvan rigardon al Urquhart, sed ne esprimis sian laŭdon. Li silentis, kaj laŭ lia malhela, senpasia vizaĝo estis tute nekompreneble, pri kio li pensas.

— Jen kia estas nia heredanto! — ekkriis Urquhart. — Sed tio ankoraŭ ne estas ĉio. Oni scias, ke li treege ŝatas ludi soldatetojn. Oni scias ankaŭ, ke li ofte pririgardas la bonegan

kavalirromanon «Gideono von Maxibrander». Tie estas multaj bildoj, bonegaj ilustraĵoj, montrantaj diversajn heroaĵojn...

— Vi rakontis al mi multe da interesa, treege multe! — diris la kuracisto. — Mi ja ĉi tie simple nenion scias...

Li verŝis bieron en la kruĉojn, blovis al la ŝaŭmo, ekparolis nehaste:

— Nun pri la afero, *herre* ŝipestro. Kiel mi komprenas, vi havos honoron post la reveno vidi grafon subadmiralon. Mi pensas, ke vi, same kiel mi, nun jam komprenas, ke la caro venas al Arĥangelsko duan fojon ne nur por amuziĝo...

Urquhart facile movetis unu brovon.

— Ĉi tie, ĉe la Blanka maro, loĝas veraj maristoj, — daŭrigis Des-Fonteines. — Vi ĉi tie estas ne unuafoje kaj vi mem bonege scias tion. Mi esperas, ke vi konfirmos mian opinion al grafo subadmiralo... Mi jam skribis al Stokholmo, ke la saĝa kaj agema vojevodo princo Apraksin konstruis novan ŝipkonstruejon apud Arĥangelsko, en Solombalo. Supre laŭ Dvino aktive laboras la ŝipkonstruejo de Baĵenin-oj. Grafo subadmiralo havas senditan de mi desegnaĵon de ambaŭ ŝipkonstruejoj. La nuna vizito en Arĥangelskon de la caro Petro kaj liaj multaj interparoloj pri estonta ŝipkonstruado ankoraŭ pli firmigas miajn pensojn pri tio, ke ne estas fora tiu tempo, kiam la moskvianoj eliros en la maron. Mi petas vin, *herre* ŝipestro, konfirmi en Stokholmo miajn supozojn...

Urquhart apogiĝis al la fotela dorso, respondis ne tuj:

— Se ili eĉ eliros en la maron, tiam ne baldaŭ, *herre* ĉefleŭtenanto! Tre ne baldaŭ. Tiel oni pensas en Stokholmo, tiel pensas ankaŭ mi.

La vizaĝo de Des-Fonteines streĉiĝis, la rigardo iĝis malvarma.

— En Stokholmo oni devas scii la veron, sed ne tion, kion oni deziras scii...

— La rusoj ankoraŭ havas nenian floton, *herre* ĉefleŭtenanto!

— Sed, diablo prenu, ili havas maristojn, jen kio estas la ĉefa.

— Ili ankoraŭ ne havas ŝipojn.

— Iliaj ŝalupoj ne estas malpli bonaj, ol niaj ŝipoj, kio koncernas la militan ŝipkonstruadon, do ili sukcesos kun tio.

La ŝipestro ridetis:

— Ne tiel baldaŭ, ne tiel baldaŭ, *herre* ĉefleŭtenanto. Dume ili ne havas per kio fanfaroni. Kaj poste ni vidos. Grafo subadmiralo Gyllenstierna ordonis al mi liveri al li nur fidindajn informojn, sed ne supozojn. Ĝuste tion mi plenumos.

— Vi liveros al la subadmiralo ankaŭ miajn leterojn! — severe diris Des-Fonteines.

Urquhart levis la ŝultrojn.

La kuracisto eksidis al la tablo, alŝovis la inkujon. Li skribis per ĉifro, kiun li sciis parkere. La ŝipestro estis malrapide trinketanta la bieron, aŭskultanta kantadon de birdoj; suspirante, ĵetadis rigardojn al la kranio. Des-Fonteines skribis longe. Kiam la letero estis skribita, Urquhart demandis:

— Ĉu vi skribis pri tio, ke ili jam havas floton?

— Mi skribis pri tio, kion mi opiniis necesa skribi! — diris

Des-Fonteines. — Kaj vi estas nur koverto por tiu poŝtaĵo, kiun mi enmetos en vin. Ĉu vi komprenis?

— Mi komprenis! — ofendite respondis ŝipestro Urquhart. — Mi komprenis, sed mia opinio estos sciigita al grafo subadmiralo.

Des-Fonteines silente riverencis.

Ĉapitro oka

Vi kien flugas? Venos vi al kiu bord',
Vi, ŝip', portanta sur la ond'
La sortojn de l' popolo granda.
Vjazemskij

1. Ĉiujn oni ekstermos!

En la griza ĉielo super la Mosea insulo ekturniĝis kaj krevis ora suno, post ĝi krevis tri drakoj — ĉiu malpli granda ol la antaŭa, post la drakoj komencis ŝvebi flugilhavaj serpentoj. Atanazio Petroviĉ pli dense envolviĝis en la mantelon, suspiris mallonge, — jen ĉio, finita la vivo. El leŭtenanto reen al kaporalo, sub komandon de majoro James...

Brulis la disbatita vizaĝo, la buŝo estis plena de sala sango. Atanazio Petroviĉ kraĉis, staris iom ĉe blinda barilo, ĵetis rigardon en la ĉielon — tie denove estis turniĝanta ia aĵo, simila al rapo, pafanta per fajraj sagoj.

— Nu, pafu, pafu! — eldiris kolere Krikov.

Sur la perono de la doganejo en krepusko estis ripozantaj dogankontrolistoj; ekvidinte la leŭtenanton, ili timigite ekstaris. Jam ĉiuj sciis, kiel fosis en liaj ĉambroj furioza kolonelo Snivin, sciis, ke kiel komandanto revenos la malamata James.

— Kial vi ne dormas? — diris Krikov. — Dormu, knaboj, tempas...

Li eniris en sian loĝejon, elbatis fajron, ekbruligis kandelon. Ĉiziletoj, skulptiletoj, alenetoj, fajliletoj — la instrumentoj, per

kiuj li faradis sian eburtajlan laboron, — estis disĵetitaj sur la planko; la libroj, kiujn kolektadis la leŭtenanto kun tia persisto, kuŝaĉis sur benkoj kaj en angulo; skulptita kombilo, kiun li komencis fari por donaco al Taisja, estis disrompita — ĝin iu intence surpaŝis per ferumita peza kalkanumo. La ebrieta ekspopo, kiun li tajlis el flava rosmara eburo, malaperis. Ne estis la figureto de ekspopo, ne estis la maljuna vojevodo kun ventrego kaj porkaj okuletoj, estis nenio, kion li tajladis dum tiuj ĉi jaroj...

Krikov eksidis, etendis la krurojn, enpensiĝis: estas malbone, ke la figuretoj estas ŝtelitaj. Pro tiuj figuretoj oni povas puni eĉ pli timinde, ol el leŭtenanto al kaporalo. Ne vane Silentulo konsilis teni la maljunan vojevodon kaj la ekspopon pli malproksime de homaj okuloj...

La pordo knaris. Sur la sojlo staris Kostjukov — kaporalo.

— Kion vi volas? — demandis Krikov.

Kostjukov, dense ferminte post si la pordon, rakontis la tutan konversacion kun kolonelo Snivin kaj majoro James en la ĝardeno sub betuloj.

— Nu? — neniom mirinte, demandis Krikov.

— Ja tia nu, Atanazio Petroviĉ, ke subĵetitaj estis al vi tiuj ormoneroj.

— Ja mi mem scias, ke subĵetitaj. Sed kia senco estas en via kaj mia interparolo?

— Atanazio Petroviĉ! — ekkriis la kaporalo. — Mi pri la vero insistos, oni eĉ min torturu!

Krikov malgaje subridis:

— Malfrue, kaporalo! Promociita mi estas el leŭtenanteco malsupren, kaj abolo de tiu ordono nun atendeblas el nenie. Ni ambaŭ nun estas kaporaloj. Tial la hodiaŭan nokton mi ankoraŭ ĉi tie dormos, kaj morgaŭ prenu min en vian taĉmenton. Ĉu vi prenos?

Kostjukov paŝis antaŭen, ĵetis la ĉapon sur la plankon:

— Atanazio Petroviĉ, mi al vi malbonon faris, kara, do mi ĝin riparu! Mi, neniu alia...

Atanazio Petroviĉ ankoraŭfoje subridis:

— Iru, frato, iru. Malbonon ne vi al mi faris, malbono eĉ sen vi sur nia tero vagas. Iru, amiko. Poste ni konversacios, estos ankoraŭ tempo...

— Ekstermos ili vin, Atanazio Petroviĉ! — kun angoro diris Kostjukov. — Ĝismorte ekstermos. Kaj nin ĉiujn ekstermos, damnitaj fremduloj. Eĉ unu homon viva ne lasos, ili mem ĉi tie multiĝi komencos, je Dio, tiel. Incendion necesas bruligi, kun tranĉiloj...

— Lasu, Kostjukov, kia incendio, ja eble ankaŭ inter ili estas homoj, por kio do ĉiujn buĉi. Iru, kaporalo, kuŝiĝu dormi...

Li riglis la pordon kaj ree enpensiĝis: sed vere, ĉu estas inter ili homoj? Eble, tie, trans la maro, ili vivas kiel homoj, eble inter si ili estas bonkoraj kaj honestaj, sed ĉi tie tio tute ne videblas...

Ĉu James estas homo?

Jen morgaŭ li transloĝiĝos reen ĉi tien kun siaj perukoj laŭ semajntagoj, dispendigos multekostajn tapiŝojn, starigos liton

sur torditaj piedoj, spegulon, seĝojn, aranĝos en la dogana korto manovrojn laŭ siaj reguloj, kiu ne sukcesos — vipi tiun per krudledaj rimenoj kun nodoj...

Li tralavis la buŝon per akvo kun salo, suspiris, trapasis el angulo en angulon la ĉambron. Dormi li ne deziris, la pensoj estis malgajaj.

Poste venis Paŭĉjo Silentulo kun kamaradoj — Vataĵnikov, Forĝisto kaj Eŭtimio Gridnev, same fuĝuloj. Forĝisto bone konis skismulojn-malnovritanojn, loĝantajn en sovaĝejo sur Vigo, plurfoje iradis tien kun sekretaj komisioj, bone scipovis legi kaj skribi, vivis rigore, sed la mondajn zorgojn, malkiel iuj malnovritanoj, ne neglektadis, dirante, ke la Sinjoro, irante sur la tero, manĝadis kaj kun kompatinduloj kaj kun paganoj, — neniun abomenis, do kiel ni aŭdacu, ĉu ni estas pli sanktaj ol nia Sinjoro?

Hodiaŭ Forĝisto alportis de iu maljuna malnovritano novaĵon: estos la fino de la mondo je la noktomezo en la jaro 1699, sed antaŭe venos sur la teron Elio kaj Enoĥo — por akuzi; poste venos Antikristo, kaj poste sonos trumpetoj, kaj venos la Dia juĝo.

Krikov elaŭskultis Forĝiston silente, poste diris:

— Okazis, ne la unuan fojon mi aŭdas. Antaŭ tridek jaroj pri la samo niaj patroj paroladis. Kaj ankaŭ ĝis nun oni rakontas, kiel ili en ĉerkojn kuŝiĝis kaj atendis la trumpetan sonon...

Silentulo kaj Vataĵnikov ekridis. Forĝisto ĵetis al ili minacan rigardon. Silentulo forturniĝis al la muro.

— Laboron ili forlasis, ĉasadon, fiŝkaptadon, — plu diris Krikov. — Ne plugadis, ne semadis...

Li svingis la manon, eksidis apud Forĝisto, diris karese:

— Forgesu vi ĉi stultaĵojn, Teodozo. Neniu nun kredos, oni ankoraŭ memoras, kiom da rido estis super ili, kompatinduloj, kiam el la ĉerkoj ili eliris kaj iris pro malfeliĉo en la drinkejon por vino...

Forĝisto deŝoviĝis de Atanazio Petroviĉ, ekparolis arde:

— Miskalkulis oni tiam, Atanazio Petroviĉ, mi vere al vi diras. La «Libro pri la kredo» kalkulas jarojn ekde la Kristnasko, kaj damnitan Satanon oni ligis por mil jaroj en la tago de la Krista resurekto. Ekde tiam necesas kalkuli, sed ne de io alia. Kristo sur la tero tridek tri jarojn vivis, — do jen, pripensu. Kaj rezultas, bonaj amikoj, ke ne en la sesdek sesa jaro ĝi estos, sed en la naŭdek naŭa. Kiom malmulte restis — kvin jaroj...

Silentulo enmiksiĝis kun subrido:

— En ĉerkon ja estas ankoraŭ tro frue kuŝiĝi, Teodoĉjo...

Forĝisto kraĉis al la blasfemuloj, kuntiris la brovojn, eksilentis. Silentulo, okulsigninte pri li al Krikov, eltrenis el la bototubo envolvitan en ĉifonon kajeron, stumblante, nelaŭte legis la titolon.

— Kio estas tiu kajero? — demandis Krikov. — De kie aperis?

— Bona homo pasis haste al la lago, forlasis, — eviteme respondis Silentulo. — Vi aŭskultu, Atanazio Petroviĉ. Pri ĉio en ĉi kajero estas skribite: pri juĝistoj maljustaj — koruptuloj, pri oficistoj — hommanĝuloj, pri uzurado kancelaria. Ĉu mi legu?

— Nu, legu!

Vataĵnikov tusetadis en la manon, turnadis la kapon, — la kajero plaĉis al li. Forĝisto rigardis el sub la frunto, suspiradis longe, diradis fojfoje:

— Tio estas vera vero. Kaj ĉio estas pro tio, ke ni sendie vivas, pro tio ni estas punitaj per granda puno...

Vataĵnikov bruskadis:

— Ĉesu jam ĝemi!

— Mi por kio la kajeron alportis, Atanazio Petroviĉ? — diris Silentulo, levante la rigardon. — Ĉi tie estas pri ĉio. Kaj pri tio, kiel oni vin pro la vero punis...

— Nu, nu! — sulkiĝis Krikov.

Silentulo turnis la flavan paĝon, egalmezure, preskaŭ parkere legis:

«Kaj antaŭ fremdlandano ni nian propran rusan homon aprezas neniom, faras al li ofendojn netolereblajn kaj per tio lin de la utilo fortiras. Ne nur el altranguloj, sed eĉ el simpluloj neniu ĉi malhonoradojn eltenos...»

— Legu, plu legu! — diris Krikov.

Por ke Silentulo kun la kamaradoj ne vidu, kiel disbatita estas lia vizaĝo, li ĉiam iradis tra la ĉambro tien kaj reen, ne haltante.

«La fremduloj ne estas rektaj bondezirantoj por ni, — legis Silentulo, — sed ni, malferminte plene la orelojn, inklinas kredi al ĉiuj iliaj herezaj babilaĵoj. Kaj fremdlandanoj tiuj havas unu avaran kaj dimalplaĉan strebon — kiel pli multe da profito de ni ricevi kaj el tiu profito ankoraŭ dekoble profiti...»

— Muzeloj skrapitaj, dimalplaĉaj! — diris Forĝisto.

— Ree vi la samon! — koleriĝis Vataĵnikov. — Skrapita, ne skrapita — sed ĉu en la muzeloj estas la afero?

Ili legadis longe. Krikov aŭskultadis atente, poste subite demandis:

— Sed kio estas do tiu homo, kiu ĉi foliojn skribis?

Silentulo singarde ŝultrolevis, volvis la kajeron tube. Anstataŭ li respondis Vataĵnikov:

— Kiu skribis, Atanazio Petroviĉ, tiun homon ni ne konas. Kaj kiu la foliojn donis, por ke ni legu, tiu estas viro de granda saĝo. Oni serĉas lin, li estas fuĝulo, nomas sin Sennomulo. Majstro lerta pri ercoj, sed kiam same kiel vin elturmentis lin fremduloj, okazis inter ili granda malkonsento, ĝis batalo. Kaj kiam komenciĝis la batalo, tiam diris la viro malpermesitan vorton. Nu, kaj foriris...

— Ruso de fremdulo el Moskvo fuĝis! — malgaje subridis Silentulo. — Jen bone!

— Sed ĉu ni ne fuĝis? — demandis Vataĵnikov. — Kaj ne de fremdulo, sed de ruso. Ĉiuj ili, hundoj, estas samaj...

Krikov, preninte de Silentulo la kajeron, malrapide trarigardadis la priskribitajn per klara skribmaniero flavajn foliojn de densa papero. Kiam li ĉion relegis mem, konsilis:

— Kaŝu, Paŭlo Stefanoviĉ, kaj ne ŝercu kun la kajero. Tiuj folioj malpermesitaj nomiĝas ribeligaj. Kiam oni vin trovos kun la kajero — ne sufiĉos batbastonoj. Oni ne malpli ol radumos vin, la manojn kaj piedojn forhakos, kaj nur poste la kapon sur pikilon metos...

Silentulo gardeme envolvis la kajeron en la ĉifonon, kaŝis en la bototubon, ridetis:

— Ni, Atanazio Petroviĉ, estas ruzaj, ĉion vidis...

Forĝisto konsilis:

— Foriru vi, amikoj karaj, malproksime, en ermitejojn, al la fonto de antikva pieco...

— Por kio? — demandis Krikov. — Ĉu por en ĉerkoj kuŝi kaj la trumpeton atendi? Ne vidas mi en tio ajnan utilon por ni!

— Ĉu esti kaporalo, mi pensas, pli bonas? — koleriĝis Forĝisto.

— Ja eble pli bonas. Al la afero estas pli proksime. Ja oni ŝipojn ĉi tie konstruas, ĉiel la sorto povas turniĝi. Kiel kaporalo mi same, Teodozo, la fremdlandajn ŝtelistojn ne forlasos. Kaj kiel fari krucosignon — por mi estas tutegale, ĉu laŭ via maniero, ĉu ne laŭ via...

— Via krucosigno estas ne krucosigno, sed malsanktigo! — kriis Forĝisto. — Ĉio estas malsanktigita! Kaj urboj kaj vilaĝoj, kaj stratoj, kaj domoj, ĉie Satano spiras...

— Lasu vi, Teodozo! — kun ĉagreno enmiksiĝis Silentulo. — Satano! Ne tie estas Satano, kie vi ĝin vidas, ne tie li estas...

La gastoj ankoraŭ iom diskutis, poste foriris.

Atanazio Petroviĉ penis ekdormi. Sed dormo ne venis...

Matene en la korton enveturis ŝarĝoĉaregoj — majoro James estis transloĝiĝanta en la antaŭan lokon. Atanazio Petroviĉ nehaste kunmetis sian havaĵon en bastokorbojn, ekportis kun la doganistoj en la grandan domon, kie loĝis doganaj oficistoj, kontrolistoj, gardistoj kaj soldatoj. Ĉi tie por li sur la plej bona

loko jam estis preparita larĝa benko, sur ĝi kuŝis fojna matraco, sur la muron ies zorgemaj manoj alnajlis felon de blanka urso.

Li eniris, — la soldatoj leviĝis, kiel antaŭe.

— Ekstari ne plu necesas! — diris Atanazio Petroviĉ. — Vi ekstaradis ne por mi, sed por leŭtenanto. Kaj unu la alian ni plu estimos eĉ sen ekstarado.

La doganistoj staris senmove, al unu el ili — maljuna Elio Pŝenicin — eliĝis larmoj el la okuloj.

— Saluton, fraĉjoj! — prononcis Atanazio Petroviĉ kaj malalte riverencis.

Al li ili same riverencis — ĉiuj, kaj same malalte.

— Jen ni denove loĝas kune! — diris li, dismetante sian havaĵon apud la benko kaj en korbojn. — Bone, ni vivos, kiel antaŭe vivis — sen ofendoj...

2. Vespero ne sufiĉis — de l' nokto detranĉis!

Ĉe Van der Gulst, la cara kuracisto, Timoteo Koĉnev, la ŝipa majstro, kuraciĝi rifuzis kategorie. Ivano Kononoviĉ kun li konsentis.

— Li nepre venenos! — diris la maljunulo. — Konas mi ilin, fremdulojn. Estu alie: prenos mi vin, amiko kara, al mi en Lodjmon, kaj reviviĝos vi ĉe mi kun lakto, kaj kun sala mara venteto, kaj kun flanoj hejmaj, kaj kun pirogoj fiŝaj... Ĉu taŭgas?

— Veturu, Timoĉjo! — konsilis Rjabov. — Ivano Kononoviĉ malbonan ne proponos...

Timoteo silentis, rigardis al la plafono, severe kaj malrapide

movis la vilajn brovojn.

— La vian ja kiam oni surakvigas? — demandis li finfine.

La maljunulo komprenis, pri kio temas.

— Matene.

Ili denove por longe eksilentis. Taisja alportis ĵus melkitan lakton, verŝis en argilan kruĉon, kun riverenco, kun fajrera rideto en la okuloj alportis al la malsanulo, kuŝanta sur benko sub fenestro. Al Timoteo tremeris la lipoj sub la maldikaj lipharoj, li same ekridetis, — ne eblis ne ĝoji, rigardante al Taisja en disfloro de ŝia feliĉo. Kvankam li ne deziris — li lipis la lakton.

— Ankoraŭ gluteton!

Timoteo ankoraŭ lipis. La fajreroj en la okuloj de Taisja ekbrilis pli hele, Rjabov divenis: «Ŝi deziris pense, mia stultulineto: se li ĝistrinkos, tiam li vivos plu kaj konstruados ŝipojn». Li ekrigardis demande. Ŝi malrapide mallevis la okulojn — vere, ĝuste tiel ŝi pensis. La rudristo brue elspiris: eksciadi, pri kio pensas Taisja, estis por li ne simpla afero, iam dek ŝvitoj verŝiĝos, antaŭ ol li komprenos inajn pensojn.

La ŝipmajstro per malgrandaj gutoj estis fintrinkanta la lakton, Taisja estis venke ridetanta, ridetis ankaŭ Ivano Kononoviĉ, balancante la maljunan arĝentbuklan kapon: ho-ho-ho, juneco — ili silentas, sed konversas. Kaj kiel tio ne tedis! Verŝajne la samon: «kara mia», «amata mia», «mevino mia», «falko mia!»... La samon, kion li al sia Maria Teodorovna diradis tie, en Lodjmo, sub bruo de mara ondo...

— Nun la nura gluteto restis! La lasta! — diris Taisja per karesa voĉo.

«Al mi ŝi diras!» — ree divenis Rjabov.

Kaj kiam Taisja eliris, li elkuris post ŝi, ruĝiĝinte pro konfuziĝo: ja tro malbonas de vira konversacio al edzina basko en vestiblon kuri, des pli trafinte sur la vojo tinon kun akvo.

Li elkuris, brakumis en la vestiblo, kie estis sekiĝantaj herboj de avino Eŭdoĥa, alpremis al pinaj rezinaj traboj, levis ŝian kapon, demandis flustre:

— Ĉu vi pense deziris?

— Nu, deziris! — brilante per la dentoj apud lia buŝo mem, respondis ŝi. — Lasu, vi miajn ostojn rompos!

Li revenis kaj, tusetante, diris:

— Bovido en la avinan legomĝardenon penetris. La najbara...

Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ rigardis al la rudristo silente, plu ridetante.

— Bovido, vi diras? — demandis Timoteo.

Kun bruo en la ĉefĉambron eniris eksaj monaĥejaj servantoj — Ĥagajo, avo Teodoro, Jegorĉjo, rudristo Semisadov, Ĉernicin, — ĉiuj estis prenintaj ŝvitbanon. Avino Eŭdoĥa renkontadis ĉiun kun riverenco, regaladis per menta kvaso, per oksikokoj, per vakcinioj, per ĉio, kion povis. Ŝi kuracadis ilin laŭ sia kompreno — iun varmigadis sub la suno, iun kuŝigadis sur drelikaĵon en ombron, iun ŝmiradis per foka graso, iun trinkigadis per bolakvo kun eglanterio, kun koniferaj pingloj. Kaj la homoj reviviĝadis rapide, kvazaŭ mirakle...

Demĉjo Borisov eksidis apud Rjabov, ekdemandis pri la nova ŝipo, pri tio, kiuj sur ĝi iros kiel matrosoj, kiu kiel

navigisto, kiu kiel ŝipestro, kia estos la ferdekestro, el kio oni kudras la velojn. La aliaj sidis ĉe la muro sur benkoj, same demandadis. Poste Kononoviĉ proponis enigmon:

Filo de arbaro bela,
De aĝo antikva,
Multajn vojojn pasis,
Sed spuron ne lasis —
Kiu estas?

— Ŝipo! — la unua de la pordo diris Taisja kaj konfuziĝis.

En krepusko de la suna tago venis fiŝistaj edzinoj el Juroso, el Ujmo, el Kuznecĥo, el Muskoj, el Solombalo, el Kurjo. Venis ili por respekti avinon Eŭdoĥa-n, kiu kuracas la virojn-nutrantojn, venis kun simplaj donacoj. Iu alportis pirogon kun hipoglosaĵo, iu anseron, iu korbon da flanoj kun kazeo, iu ovojn. Infanoj tenis sin je la patrinaj baskoj, gapadis al la patroj, maldikiĝintaj en la monaĥeja malliberejo, al la fama rudristo Rjabov, al la sorĉistino avino Eŭdoĥa, al la gaja onjo Tainjo, kiu ĉiujn ilin karesadis kaj suprenĵetadis per la malpezaj manoj, kiu ĉiujn kisadis kaj regaladis — iun per kolora ĉifono, iun per bunta ŝnureto, iun per rubandeto.

Kiu scias, pro kio tiel kutimas nia popolo, ke ŝajne ne estas kaŭzo por gajo, ŝajne neniu atendas ion bonan, sed subite ekbrilas al unu la okuloj, komencos li kanton. Alia daŭrigos, kaj jen — eknaĝis kiel cigno en danco iu antikva oldulino, ritme frapas:

Aĥ, mi ĉiam danci volus,
Sed por paŝi mankas fort'...

Tiel okazis ankaŭ en tiu ĉi tago. Ili unue komencis kanti

malrapidajn, antikvajn kantojn. Sed ekridis Taisja, komencis rapidi, la virinoj subtenis kaj ekis:

Prenos mi la verdan drapon
Kudros kaftanon por Ivaĉjo kara...

Ivano Kononoviĉ kuntiris la brovojn, avo Teodoro same, ili deziris aŭdi ion pri Dio, sed Taisja eĉ svingis la manojn:

— Ni scias! Aŭdis! — kaj ridinde mokimitis funebriston: — «La trumpeto krias, la juĝisto sidas, la libro de nia vivo — malfermi-i-iĝas!» Pri la maro-oceano ni prefere kantu!

Ŝi ekstaris ĉe la fenestro kaj ekkantis:

Altas-altas ĉielo blua,
Larĝas-larĝas l' ocean'-maro...

La viroj ĥore per plena brusto subtenis:

Muskaj marĉoj — eĉ fin' ne videblas
De nia Dvino, de l' Arĥangelska...

Avino Eŭdoĥa ekbruligis la fornon — por rosti la anseron, faris rapidan paston; aŭdeblis en la domo, kiel ŝi rakontas al la amasiĝintaj ĉirkaŭ ŝi infanoj, kie la forno havas «katejon», kie katoj varmiĝas kaj ronronas.

Ankaŭ Timoteo estis rakontanta al la infanoj, ĉirkaŭintaj lin, pri maro, rakontanta nelaŭte, rigardante malproksimen per la brilantaj pro la malsano, pro la febro okuloj.

— En nia lando akvo estas la komenco kaj la fino. Nin naskis la maro, ĝi nin nutras, kaj ĝi nin sepultos. Sude de la Malvarma oceano Glacia disverŝiĝis la Blanka nia maro. La Dvinaj kvietaj akvoj falas en la Blankan maron. Kien ajn vi iru — sen barko, sen ŝipo vi nenion atingos.

Blankkapaj, klarokulaj, kvietaj staris ili ĉe la benko, rigardis al Timoteo, al liaj manoj, per kiuj li montradis maron, riveron, barkon, aŭskultis reteninte spiradon. Ĉe la tablo la fiŝistoj kaj rudristoj, interrompante unu la alian, estis rememorantaj oceanajn vojojn, per kiuj ili iradis, rememorantaj, kiel ili vintrumis en Grumanto, kiel iris al la norvegoj, kiel furioziĝis la norda vento kaj antaŭ la tempo alpelis glaciojn, katenis la ĉasistojn en glacian zonon.

Kaj kio en tio estis ridinda — kiu scias?

Sed eĉ tie ĉio de la komenco ĝis la fino estis ridinda por la viroj: kaj kiel ili botojn pro malsato en akvo malsekigis kaj manĝis, kaj kiel ili entute intencis morti, — avo Teodoro sian mortan longan ĉemizon eltrenis, mortotukon kun kapuĉo, kronon sur la kapon, rozarion. Kaj kiam la avo komencis prepari sin al morto, subite venis urso. La avo kriis, insultis la urson, — kaj la urso vundis lian ŝultron ĝis sango. Pro tiu ofendo avo Teodoro entute ŝanĝis sian decidon morti...

La avo, aŭskultante, hihiadis falsete, viŝadis gajajn larmojn, svingadis la manojn:

— Aj, ŝerculoj! Aj, mokuloj! Ofenduloj!

Potenca fiŝista ridego tremigadis la domon, eĉ la malgajaj fiŝistaj edzinoj komencis subridi, kovrante la buŝojn per la sarafanoj, — jen kiaj viroj, pri ĉio ridas, sed kiaj ili estis, kiam ili revenis el la monaĥeja malliberejo...

— Mortopreĝon por si mem ni kantadis! — sufokiĝante pro rido, estis rakontanta Rjabov. — Sed ne laŭ la kanono. Avo Simono kun ni tiam iradis kiel ĉefo, severa estis! Jen li frapis min per la apogbastono al la kapo, ke mi malĝuste kantas. Nu,

kia povas esti mortopreĝo, kiam li per bastono batas. Kverelis ĉiuj kaj kuŝiĝis dormi...

La ansero rostiĝis, la flanoj bakiĝis, avino Eŭdoĥa kun Taisja primetis la tablon, riverencis al la gastoj — ĉu ne tempas manĝi?

Sub la fenestro iu frapis, demandis laŭte:

— Ĉu vi dormas, kristanoj?

— Ne dormas, vivas! — laŭ la pomora moro respondis avino Eŭdoĥa.

En mallonga uniforma kaftano, strikte zonita, frapante per la botoj, eniris kaporalo Kostjukov, gratulis pro bona festeno, petis Rjabov-on por nelonge eliri por afero. Taisja por momento maltrankviliĝis. Kostjukov diris:

— Ne koleru, Taisja Antipovna. Je Dio, por nelonge, por konsilo mi venis...

En la korto ili eksidis sur la peronon, Kostjukov ekparolis:

— Vi, rudristo, nun ĉe la caro servon plenumas. Instruu, kiel mi povas kun bona homo konversacii. Pri Krikov, pri Atanazio Petroviĉ...

Rjabov pensis nelonge; ne enirante en la domon, li ekiris kun Kostjukov al la bordo de Dvino. Karelo Ignato transportis ilin ambaŭ sur la Mosean insulon, dum la vojo la kaporalo sciigis al la rudristo ĉiujn detalojn de la fia ago de Snivin kaj James pri la subĵetitaj ormoneroj. Rjabov aŭskultadis, insultadis...

Ievlev-on ili trovis en barako, kiu estis konstruita por la caraj sekvantoj apud la palaco, en picearo. Ĉi tie, disĵetinte la

fortegajn manojn, estis ronkanta sur fojno Menŝikov; estis manĝanta per kulero el ligna bovlo mirtelberojn Voronin; Silvestro Petroviĉ estis leganta en kandela lumo dikan libron en leda bindaĵo.

— Kio tie okazis? — demandis li, kiam Rjabov ŝoviĝis en la barakon.

Li ŝtopis per tabako sian pipon, ekfumis kaj eliris al la Dvina bordo.

Ili eksidis triope vice sur trabon, Rjabov ekparolis. Silvestro Petroviĉ aŭskultis silente, malalte klininte la kapon, kvazaŭ hontis. Kostjukov subite interrompis la rudriston, komencis, stumblante, rakonti mem.

— Mi eĉ sur ekzekutan ŝtipon, eĉ sur pendumilon, kien ajn iros! — diris li subite. — Mi nun ne havas revenan vojon! Vi, princo...

— Ne princo mi estas! — diris Ievlev.

— Nu, ne princo, sed ĉiel estro! Vi diru, kara, al la caro, diru la veron, ne scias li, oni trompis lin, je Dio. Tia homo estas nia Atanazio Petroviĉ, tia, ho Dio...

Ievlev sencindrigis la pipon, ŝrumpis pro nokta humideco, ne respondante, leviĝis.

— Ĉu vi diros? — demandis Kostjukov.

— Ni vidos!

Kaj, ĝibetiĝinte, Silvestro Petroviĉ foriris ĉe sin en la barakon. Kostjukov tiris la manikon de Rjabov:

— Kio estos nun?

Rjabov senparole levis la ŝultrojn.

3. La unuaj matrosoj

En la sekva nokto per du ĉevaloj al la domo de avino Eŭdoĥa alrajdis sendita de Ievlev oficiro — ne satdorminta, tute hirta; li ordonis al la rudristo senprokraste, urĝe esti sur la Mosea insulo...

Ne lavinte la vizaĝon, oscedante, la rudristo per la ventro surfalis la ĉevalon, transĵetis la piedon, ekrajdis apud la oficiro.

— Vere, kiel hundo sur barilo! — subridis la oficiro, ĵetante rigardojn al Rjabov.

La rudristo respondis senkolere:

— Al ĉiu la sian, sinjoro. Mia afero estas la maro, via — la ĉevalo.

Ĉe la transpasejo staris preta boateto. Sur la Mosea insulo estis pasumanta en atendo Silvestro Petroviĉ Ievlev kun Menŝikov, Voronin kaj Ĉemodanov. Ili, evidente, ankoraŭ ne kuŝiĝis dormi, la vizaĝoj de la caraj sekvantoj estis kovritaj per fulgo de lignofajra fumo, ŝvelis pro kulpikoj, la okuloj larmis.

— Vin kvazaŭ la tero englutus! — diris Ievlev, irante renkonten al la rudristo. — Kien vi malaperis, amiko dolĉa? Kie estas la matrosoj por la nova ŝipo? Baldaŭ estos la surakvigo, sed da matrosoj ne estas eĉ unu!

La rudristo pensis iom, sidiĝis en la boateton, revenis en Arĥangelskon, ekiris tra kurbaj stratetoj kaj interstratetoj, tra malaltaj kabanoj — serĉi, kiu el fiŝistoj estas hejme. Multaj estis en la maro, aliaj foriris al malproksimaj ĉasadoj kiel dungitoj, iuj estis fleksantaj la dorsojn kiel ŝarĝistoj.

Dormantojn Rjabov vekadis, eltrenadis el la ĉambroj, skuadis, ordonadis iri post si.

— Kien? — demandadis la fiŝistoj, oscedante.

— Al ŝtata vivtenado! — respondadis Rjabov.

— Ĉu en malliberejon?

— Poste ni vidos...

— Ĉu al cara servo?

— Al ĝi.

La edzinoj kroĉiĝadis al la edzoj, lamentadis, la viroj ŝercadis. Unu edzino, nigrabrova, ruĝvanga, en kolero pelis la rudriston for. Li eksidis sur benkon, diris kun signifo en la voĉo:

— Caro Petro Aleksejeviĉ hodiaŭ ŝipon surakvigas duferdekan, sed ŝi insultas. Jen kia! Regalo estos al la matrosoj de la caro, festeno, honoro, sed al ŝi ne plaĉas. Jen kia obstina edzino...

Kaj ankaŭ el tie la edzo foriris, sed por ajna okazo kunprenis panon. Cara servo estas konata — vi povas sidi kun malplena ventro kaj plori.

Avo Teodoro, Ĥagajo, Jegorĉjo, Semisadov, Kopilov, Nil Longinov, eĉ lardofandisto Ĉernicin — iris sen persvadoj: ili firme kredis al la brigada rudristo Rjabov. En sufiĉe granda amaso, kun ŝercoj, per rapidaj paŝoj ili ekiris al Solombalo. La procesion estis finanta Demĉjo Borisov, li paŝadis gaje, pensis — eble, venis lia tempo, eble, ankaŭ li estos nun matroso.

Al Solombalo ili sukcesis ĝustatempe, — la caro nur komencis krii, ke mankas matrosoj. En la ŝipkonstruejo flirtis

koloraj flagoj kaj flagetoj, klakadis sub Dvina vento, la silka ŝtofo brilis sub la matena suno. Seninterrompe ludadis klarionistoj, bruis timbaloj, ritme krakadis tamburoj. Bojaroj el la cara sekvantaro, ne sciante, kie trovi lokon por si, vagadis en karaj vestoj sur la korto, penante ne trafi al la caraj okuloj...

Ievlev renkontis la matrosojn afable, ordonis esti kune, ne disiri, ĝis oni ilin vokos por afero. La matrosoj lokiĝis en venteto, solide, sen scivolemo pririgardadis la ŝipon, pridiskutadis ĝiajn avantaĝojn kaj mankojn, kiel terkulturistoj pridiskutas ĉevalon.

— Do kiu sur ĝi iros kiel rudristo? — demandis Longinov. — Ĉu iu fremdlandano aŭ iu el la niaj, el fiŝistoj?

Avo Teodoro ekridis, diris moke:

— Nian fraton sur ĉi ŝipon oni eĉ ne enlasos. Ni estas en bastoŝuoj, dum tie ĉiuj estas en veluro. Ni puŝos ĝin en la akvon kaj — hejmen. Ĉu tiel, Ivano Sabateiĉ?

Rjabov ne respondis, fiksrigardante al orgojlaj fremdlandaj ŝipistoj Nikols kaj Jan, kiuj iradis ĉirkaŭ la ŝipo, kriadis per raŭkaj voĉoj, kvazaŭ vere estis ili, kiuj konstruis la ŝipon.

— Ŝipistoj! — malestime diris Ĥagajo. — Dum tiuj, kiuj meritas honoron kaj gloron, kaj caran dankon, tiuj eĉ aliri timas... Jen en boateto meze de Dvino skuiĝas...

Sur la rivero, malproksime, jen leviĝante, jen malleviĝante, estis balanciĝanta boataĉo kun du homoj, — tio estis Ivano Kononoviĉ kaj Timoteo Koĉnev.

Sur la bordo pafis kanono, la klarionistoj ĉesis ludi, en la silento sur la supran ferdekon de la ŝipo leviĝis Lefort, Apraksin, Ievlev, Menŝikov kaj Voronin. La caro demalsupre,

kunmetinte la manplatojn paroltube, kriis:

— Flagon!

Ekbatis tamburoj, laŭ la ŝtuparo suprenkuris Ĉemodanov kun la poba ŝipa flago. La sekvantaro salutis lin per la spadoj, li preterkuris la pobferdekon, leviĝis sur la supran galerion kaj tie haltis. La tamburoj eksilentis.

— Rudriston al la stirrado! — ree kriis Petro.

Rjabov, Semisadov, Kopilov, Longinov leviĝis samtempe, ne rimarkante unu la alian, ekiris al la caro. La caro, viŝante la ŝvitan vizaĝon kaj la sunbrunan kolon per malpura tuko, ordonis al Rjabov:

— Supren!

Rjabov ekkuris laŭ la ŝtuparo, Apraksin prenis lian manon, firme starigis ĉe la stirrado, demandis per elturmentita pro emocio voĉo:

— Ĉu vi scias, kion fari necesas?

Ĉi tie estis multe pli vente, ol malsupre, netolereble hele brilis sub la suno Dvino, tute super la kapoj kun krioj estis flugantaj mevoj.

— Li scias, scias! — anstataŭ Rjabov respondis Silvestro Petroviĉ.

Caro Petro malsupre ĉe la pobo estis lavanta la manojn. Majstro Jan estis verŝanta al li akvon el arĝenta kruĉo, majstro Nikols tenis broditan viŝtukon. Ree batis la tamburoj. Petro viŝis la manojn, ĵetis la viŝtukon, kriis per laŭta gaja voĉo:

— Kun Dio! Haku la kablojn!

Unu post la alia komencis fali la traboj, subtenantaj la ŝipon ĉe la flankoj. Ritme, intermite ekfrapis hakiloj en lertaj manoj de ĉarpentistoj. Petro kraĉis al la manoj, alte svingis martelon kaj per la tuta forto batis sub la kilon. La ŝipo tremeris, longe knaris kaj ekmoviĝis, ĉiam pli kaj pli rapide glitante sur la glitiloj, ŝmiritaj per graso. La stirrado ritme tremeradis. Rjabov staris streĉite, preta en ajna sekundo meti la manojn sur la stirradon, sed nun ankoraŭ ne estis la tempo...

Levita ondo batis en la pobon, la ŝipo balanciĝis, ĝi ekiris sur la akvo.

— Ankrojn! — kriis Ievlev.

Rjabov sen hasto metis la manojn sur la stirradon. Ne atinginte la mezon de la rivero, la ŝipo haltis sur la ankroj, ĵetitaj momente. Nun la ankrojn oni «prenis». Tute proksime ĉe la ŝipflanko estis balanciĝanta la boateto, Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ, levinte la kapojn, estis rigardantaj al la ŝipo, pri io konversaciante inter si. Rjabov transfleksiĝis malsupren, kriis al la ŝipmajstroj:

— Bone konstruita! Ĉu vi aŭdas, Timoteo!

— En la maro, mi pensas, estos pli klare! — respondis Ivano Kononoviĉ kaj prenis la remilojn.

Al la nova ŝipo aliradis gigoj de la caro kaj de la sekvantaro, post ili malrapide moviĝis barko kun ĉarpentistoj — por finkonstrui la ŝipon surakve. Petro rapide enkuris supren, brakumis Apraksin-on, ordonis meti tablojn por festenoj. Rjabov, vokinte Ievlev-on flanken, mallaŭte demandis:

— Ĉu matrosoj hodiaŭ ne necesas?

— Hodiaŭ ili povas ripozi, sed morgaŭ ili estu ĉi tie! —

diris Silvestro Petroviĉ. — Ni ekipos la ŝipon — kaj en la maron...

Rjabov rigardis al Ievlev ridetante.

— Kial vi ridas? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ĉi tie estas laboro ankoraŭ por monato! — diris la rudristo. — Pli frue ne eblas sukcesi. Mastojn starigi, kanonojn, rigi, kaj vi — morgaŭ! Ĉio ĉe vi estas hasta, kvazaŭ ĉe etaj infanoj...

Silvestro Petroviĉ fosis en sia monujo, trovis rublon, etendis al Rjabov:

— Jen, regalu la matrosojn pro la festo de surakvigo. Kaj ĉiuj estu pretaj...

Post kelkaj tagoj Ievlev ree sendis oficiron por Rjabov. La rudristo rapide kolektis siajn matrosojn, hisis velon sur la ŝalupo de la karelo Ignato, aliris al la ŝtuparo de la nova ŝipo, el kies kanontruoj jam elstaris tuboj de pafilegoj, alveturigitaj de Petro el Moskvo. Avo Teodoro leviĝis supren la unua, glatigis la ĉemizon el hejmefarita tolo, paŝis per la piedoj en novaj ledŝuoj, komandis:

— Sed, knaboj, ne senhonoriĝu, la afero estas tia...

Unu post la alia la fiŝistoj leviĝadis laŭ la ŝtuparo, ne sciante, kien iri plu, kion fari, kiu ĉi tie estas la ĉefo — ĉu Lefort en siaj grandegaj bukloj, ĉu Gordon, kiu estis penseme rigardanta al la plumbaj akvoj de Dvino, ĉu Menŝikov, kiu estis dormetanta en leda fotelo...

Renkonten, larĝe paŝante, eliris caro Petro, demandis laŭte:

— Ĉu matrosoj?

— Matrosoj! — elstariginte antaŭen la barbeton, respondis avo Teodoro.

Petro Aleksejevič bonanime subridis, balancis la kapon, demandis:

— Kion do vi en la korboj alportis?

— Ja provianton! — respondis avo Teodoro. — Ja ne estis interkonsentite, per kio ni nin nutros, kaj jen ni kunprenis por ajna okazo, eble, vi per nia propra nutro ordonos labori.

— Antaŭvidemaj vi estas! — diris Petro.

— Certe, Siro! — respondis avo Teodoro. — Sen pano ja oni labori ne povas...

La caro foriris, avo Teodoro, kuraĝiĝinte, kondukis la pomorojn laŭ la ŝipo. Post ili ekiris Menŝikov, Ievlev, Apraksin, aŭskultante rezonadojn de avo Teodoro.

— Ja nemalbonas! — diradis li, levinte la kapon kaj pririgardante la mastojn. — Nemalbonan barketon oni konstruis, kun saĝo. Jen kiaj traboj staras... kaj la svingilo estas sur trabo...

— Kia tia svingilo? — demandis Menŝikov.

— En nia maniero oni tiel diras, en la mara, — respondis avo Teodoro. — Kaj en la ilia, fremdula — ventoflago.

Per la tre helaj kaj ankoraŭ akre vidantaj okuloj li en silento sen hasto pririgardadis la ŝipon kaj faradis siajn rimarkojn — pri mastoj, kiujn li nomadis traboj, pri jardoj, pri veloj kaj pri la tuta rigilaro de la ŝipo. Kaj li la unua ekpaŝis sur la ferdeko — rigardi, kiaj estas lukoj, nomante ilin fermopordoj, kiel estas

metitaj ferdekoj, kiel estas konstruita la korpo mem de la ŝipo, kiaj estas sur ĝi kajutoj.

Poste, same sen hasto, ĉirkaŭita de siaj maristoj, amikoj kaj malnovaj disĉiploj, li ordometis la hisilojn, determinante destinon de ĉiu ŝnuro, de ĉiu kablo, de ĉiu nodo kaj bloko. Fojfoje li disputadis kun Semisadov, sed disputadis pace, eksciante skrupule destinon de novaj, ankoraŭ nekonataj detaloj, metitaj de fremduloj sur tiu ĉi ŝipo...

En la hela krepuska vespero avo Teodoro estis nomumita maato, Semisadov ĉefrudristo, Ĥagajo ferdekmatroso, lardofandisto Ĉernicin — kanonsubserĝento, aliaj — jen topmatroso, jen holdmatroso, jen ankristo. Al Demĉjo Borisov oni donis oficon, taŭgan ĉe lia handikapo: li nun estis ĉefa rigisto.

— Kio estas ĝi — maato? — demandis avo Teodoro.

La vojevodo, forturniĝinte de la avo, kiu terure odoris je ajlo — li ĵus vespermanĝis per panpeco kaj du ajlaj bulboj, — klarigis, kiu estas maato sur ŝipo. La avo nedifinite diris «hm», kaj ne estis klare, ĉu li komprenis aŭ ne komprenis.

— Ĉu estro, ŝajne?

— Maato estas... — incitiĝante, ree komencis klarigi Apraksin.

Sed ne findiris, svingis la manon kaj foriris.

En krepusko, sub krio de falantaj al riveraj akvoj mevoj, la matrosoj, manĝetante apud kabla volvaĵo, konversaciis pri tio, kia nun estos ilia vivo, kiom da rubloj estos salajro, kian oni donos ŝtofon por vesto kaj kien oni ordonos iri, en kiajn landojn...

— La caro ludos kaj forgesos, — diris Nil Longinov, nomumita ĉefa ferdeka matroso. — En Moskvo ja maro ne estas, ne eblas ludi. Nur unu estas bona — de la monaĥoj ni foriris...

— Foriris — bone, — diris Ĥagajo, — sed la infanojn etajn nutri — jen granda komplikaĵo... Estas nek propra velboato, nek bona reto, nudaj ni estas.

— Hodiaŭ ni dum la tuta tago la propran nutraĵon ronĝas! — kolere diris avo Teodoro. — Tian ordon mi eĉ donace ne bezonas... Ili povus almenaŭ tripon kuiri, ni almenaŭ varman supon manĝus...

Kopilov demalsupre ekrigardis al trankvile staranta Rjabov, diris riproĉe:

— Trovis vi al ni, Ivano Sabateiĉ, laboron. Diros al vi dankon niaj infanoj...

Nur Jegorĉjo Pustovojtov estis kontenta: jen kanonoj, jen kuglegoj, kaj en la maron, oni diras, ni iros, kaj ŝajne arkebuzon oni donos, aŭ en la plej malbona okazo halebardon. Estus bone pasi kun halebardo apud la monaĥejo, timigi la monaĥojn...

Dum ili konversaciis, aliris gaja Patriko Gordon, demandis:

— Ĉu matrosoj?

— Maraj laboruloj! — respondis Nil Longinov.

— Laboruloj?

Gordon pripensis, la vorto «laboruloj» al li plaĉis, li kapjesis:

— Tre bone!

Ŝovinte la manojn sub la larĝan ledan zonon kun kupraj platoj, li longe silente rigardis al la maristoj, poste per severa voĉo komencis demandi, kiu ŝnuro por kio estas destinita. La pomorajn nomojn li komprenis malbone, sed viglaj respondoj same plaĉis al li, kiel plaĉis ankaŭ la sendependa, libera konduto de la fiŝistoj.

— Bone! — ree diris Patriko Gordon.

Kaj li ekiris supren, tien, kie caro Patro Aleksejeviĉ estis akceptanta gastojn-fremdlandanojn okaze de la naskiĝo de ankoraŭ unu ŝipo — la dua en la rusa floto. Tie, supre, fremdlanda lertulo, matroso de «Ora nubo», estis kantanta kaj ludanta liuton.

— Aŭskultu, jen kantas! — penseme eldiris Ĥagajo.

— Same la kanto estas malgaja! — respondis Longinov. — Ankaŭ iliaj matrosoj malfacile laboras, ne ĉiam festenas...

— Ĉu oni ilin batas? — mallaŭte demandis Jegorĉjo.

— Ĝuste, batas! Okazas, ke ĝismorte...

Al la fiŝistoj iĝis triste, Rjabov konsilis:

— Vi kantu, karuloj...

— Ne estas kaŭzo por kanti! — respondis Semisadov.

Ili sidis silente, aŭskultadis ritman plaŭdadon de la Dvinaj akvoj, la melankoliajn sonojn de la liuto. Aliris Ievlev, silentis iom, poste diris:

— Do, fraĉjoj, baldaŭ ni en la maron iros.

La matrosoj silentis.

— Ĉu pretas vi?

— Kaj kiu kiel ŝipestro? — demandis Semisadov.

— La estro ĉe vi estos vicadmiralo sinjoro Buturlin... — ne tre certe diris Ievlev. — Buturlin Ivano Ivanoviĉ.

Semisadov demandis ankoraŭ:

— Kaj ĉu maron li vidis... tiu Ivano Ivanoviĉ?

Estiĝis silento. La demando estis aŭdaca. Semisadov atendis. Atendis ankaŭ la matrosoj.

— Maron vi, knaboj, vidis! — diris trankvile la tablestro. — Kaj vi ne la unuan fojon en la maron iros...

Ili silentis iom.

— Ĉu ni dormi kuŝiĝu ĉi tie, aŭ kie? — ree demandis Semisadov. — Kaj kun la provianto ni magriĝos, sinjoro: ĉu per nia propra ni la caran servon servu, aŭ la fisko nin nutros? Hodiaŭ ni entute ne estis nutritaj, — kiu kunhavis panon, tiu maĉis, kaj kiuj ne kunprenis, tiuj restis malsataj...

Ievlev diris, ke li ordonos pri nutrado kaj ke provianto nun iros de la fisko. Ili parolis ankoraŭ — ĉu ili sukcesos regi la grandan ŝipon en la maro. Avo Teodoro promesis: se tempesto ne falos — ni sukcesos, kaj se batos skualo, — ĉio estas en la Dia mano, tiam necesos preĝi.

— Ne multe vi, avĉjo, preĝas ja dum ŝtormo, — gaje diris Semisadov, — krom sakrado, nenio aŭdeblas de vi sur ŝalupo...

— Pekulo mi estas! — diris avo Teodoro. — Min pro la pekoj diabloj sur braĝoj bruligos. Sed vin, senkapulojn, ĉu eblas per preĝo regi? Laika vorto — ĝi povas trafi...

La fiŝistoj ekridis, avo Teodoro same.

— Kiam do ni en la maron iros? — demandis Semisadov.

Silvestro Petroviĉ respondis, ke ne tiom baldaŭ. Caro Petro estas atendanta ankoraŭ unu ŝipon, kiu devas veni el Holando, kie ĝin konstruis holandaj majstroj. La ŝipo estas bona, multekanona, ŝipestro sur ĝi estos Jan Flam...

— Batados, verŝajne, forte! — rimarkis kvazaŭ por si mem Nil Longinov.

— Aŭdis mi pri li, — diris Ievlev, — honesta homo.

— Ni vidos! — subridis Rjabov.

Kaj, subite leviĝinte, ekiris post Ievlev sur la pobferdekon. Apud la ŝtuparo li flustre demandis:

— Silvestro Petroviĉ, ĉu estas iaj novaĵoj pri nia Krikov?

Ievlev svingis la manon, leviĝis laŭ la ŝtuparo supren. Estis jam postnoktomezo, la gastoj disiris. Menŝikov estis dormetanta en fotelo. Petro, sidante sur la rando de la tablo, svingante la piedon en ŝuo kun banto, kun malsimpatio aŭskultis sekretarion Vinius-on, kiu estis leganta al li longan petskribon. Venteto apenaŭ ŝanceladis kandelajn fajretojn, el la proksima bordo aŭdeblis voĉoj de noktaj gardistoj:

— Rigardu!

— Aŭskultu!

Kaj forta malalta baso de ĉevala gardisto:

— Sankta Nikolao-miraklisto, preĝu Dion pro ni! Pasu, pasantoj!

Silvestro Petroviĉ alsidiĝis al Apraksin, demandis flustre:

— Kio okazis, Teodoro Matejeviĉ?

— La samo... Pri fremduloj estas la petskribo. Ili arĝenton fandas ne arĝentan...

Vinius finlegis. Petro senparole komencis ŝtopi la pipon. Vinius tusis. La caro diris morne:

— Unu kulpulon vi kaptos, aliaj — senkulpaj — ektimos, fuĝos trans la maron. Kaj mi majstrojn jen kiele bezonas, lertulojn, ŝipistojn, kuracistojn, ercesploristojn. Kiom mi enbatas en viajn ŝtipajn kapojn: en Rusujo fremdulojn de longa tempo oni ne toleras, ne kredas ilin eĉ iom, ni tiun moron, preĝinte al Dio, firme finos. Oni nomas ilin per ofendaj vortoj, fraĉoj aŭ alie. De kie estas tiuj vortoj, kiu ilin elpensas? Por kio?

Ievlev leviĝis de sia loko, aliris la caron. Petro Aleksejeviĉ ĵetis al li mallongan rigardon kaj, kvazaŭ diveninte malkonsenton kun siaj pensoj, plu parolis eĉ pli forte, kolere:

— Nun mi aŭdas nur plendojn. Ili diras, ke ne povas sur siaj ŝipoj al ni veni, molestojn suferas grandajn. Glorinda ŝipestro, antaŭa bona konsilanto, plurfoje montrinta sian amikemon, sinjoro Urquhart, kun larmoj ĵuris, ke iu el la sekvantaro insultis lin per fia vorto spiono, kio signifas informiston. Kaj ĉiel al li minacis — al tiu negocisto kaj maristo, ke tiu Urquhart ne plu venu al ni. Mi lin, hontante pro tiu konversacio, ne pridemandis, kiu estas tiu sekvantarano, sed al vi mi diras: se mi ankoraŭfoje aŭdos — ne indulgos. Mia vorto estas firma!

— Ĉu ankoraŭ legi? — demandis Vinius.

— Pri kio?

— Diversaj, Siro, estas bezonoj pri vi...

— Atendu...

Li ekstaris, haltis antaŭ Ievlev.

— Vi kion bezonas?

— Siro...

— Nu? — kriis Petro.

— Siro, Krikov leŭtenanto...

— Kio Krikov leŭtenanto? — furioze demandis Petro. — Ne kulpas? Vi defendas lin? Ĉu mi pro Krikov, dogana ŝtelisto, la tutan komercon transmaran perdu? Defendas vi, defendanto? Oj, Silvestro, tro kuraĝa vi iĝis!

Liaj lipoj estis saltantaj, la vizaĝo spasmis. Silvestro Petroviĉ blankiĝis, staris senmove. Vinius timigite retropaŝis.

Subite Menŝikov kriis per sovaĝa voĉo:

— Savu, mi brulas! Estingu min, fraĉjoj...

Petro abrupte turniĝis. Menŝikov vere estis brulanta: sur li ekbrulis unu rubando, poste alia. Petro ŝiris la tablotukon, surĵetis sur lin supre. Apraksin verŝis kvason el kruĉo. Menŝikov saltadis sur la ferdeko, kriegis...

— Dormulaĉo! — grumblis Petro. — Ĉirkaŭvolvis vin per rubandoj, kiel inaĉo...

Kaj ordonis:

— Dormi! Matene kun lumo mi ĉiujn vekos!

Aleksandro Daniloviĉ, ĝemante, palpebrumis al Ievlev, diris flustre:

— Nu, ĉu lerte? Vi, Silvestro, por mi eterne Dion preĝi devas. Neniel ili deziris bruliĝi, tiuj rubandoj damnitaj... Ho,

jen servo nia, aĥ!

4. Ili renkontiĝis

Ili renkontiĝis, preskaŭ kunpuŝiĝis ĉe la ŝtuparo de la cara jaĥto «Sankta Petro». Antipo — en nova ĉapo, en nova maldikdrapa kaftano, en botoj, ĵus kudritaj dum la nokto speciale por tiu ĉi okazo, kaj Rjabov — nudkapa, makulita per peĉo de ŝnuroj, kun kiuj li estis okupiĝanta sur la jaĥto...

Bojaroj kun la caro staris nemalproksime sur la jaĥta pobferdeko. Apraksin estis ĉe la ŝtuparo supre. Ŝein, Gordon kaj Lefort, interparolante, estis malrapide defilantaj de la palaco al la bordo.

Antipo ĉirkaŭrigardis.

Ĉu bati? Sed ĉu eblas, kiam la caro mem estas proksime? Kaj eĉ se eblus, ĉu Ivaĉjo permesos ofendi sin? Ĉu krii? Oni priridos — estas certe. Kaj kion krii? Ke li la filinon forkondukis kaj edziĝis?

Ruĝiĝante, Antipo firme kunpremis la nodplenajn pugnojn.

La rudristo ekrigardis en liajn okulojn, respekte, profunde riverencis.

— Ĉu vi klinas vin? — mallaŭte demandis Antipo. — Vipuro...

— Pardonu, patro! — diris Rjabov per nekomprenebla voĉo: ĉu vere humile, ĉu moke.

— Mi vin pardonos! Koton vi manĝos! Per sango vin lavos, latrono, kanajlo, senhonta muzelo.

— Ĉu vere, patro? — jam kun senkaŝa moko, sed plu per

humila voĉo demandis Rjabov.

Apraksin desupre vokis:

— Ĉu Antipo, Timotejev?

Antipo timigite glatigis la kaftanon, frapante per la botoj, kvazaŭ ferumita ĉevalo, suriris la jaĥton. Lia larĝa vizaĝo, borderita de la hela kun grizo barbo, brulis, kiel post bano. Survoje li retrorigardis. Rjabov estis trankvile konversacianta kun Teodoro Baĵenin. Tiel, apenaŭ spirante pro furiozo, ne sukcesinte trankviliĝi, Timotejev aperis antaŭ Petro.

Vokita antaŭ la caran vizaĝon, li pensis, ke oni vokas lin pro komercaj aferoj, kaj iris kiel fiŝa negocisto. Tamen la caro pri fiŝo ne menciis eĉ per unu vorto, sed demandis nur, ĉu Antipo scipovas kompreni mapon kaj ĉu li konas la kompason?

— Pri tiu afero ni de longe estas kiel psalmistoj! — nekompreneble respondis Antipo.

— Kio? — severe demandis la caro.

— Per ĉi dokteco kaj instruiteco ni de la pratempoj estas dotitaj! — eĉ pli enigme respondis la rudristo.

— Ne stultumu! — ordonis Petro. — Parolu simple.

Antipo konfuziĝis — kiel paroli kun caro simple? Kaj diris:

— Scias mi, Siro, kaj kompason, kaj mapon komprenas.

— Jene. Ĉu grandajn ŝipojn vi kondukadis?

— Kondukadis, Siro, en pasintaj tempoj.

— Ĉu kun jaĥto vi sukcesos?

Antipo por momento ektimis, pripensis kaj respondis, ke, probable, sukcesos.

Ili silentis iom.

La caro demandis, kiu estas la plej bona rudristo en tiuj ĉi lokoj.

Antipo ĵetis oblikvan rigardon al Rjabov, kiu staris malsupre ĉe la ŝtuparo, respondis penseme:

— Panov estis, — lin la maro forprenis. Avo Mokeo, — same la maro prenis, Nikanoro Suslov iĝis maljuna. El la junaj estas...

Li paŭzis, aldonis mallaŭte:

— Verdire, Siro, pli bona ol Rjabov Ivano ne troveblas rudristo.

La caro de sur alteco de sia granda kresko kun miro rigardis al Antipo, diris, levante la ŝultrojn:

— Sed kiel iri kun li, se li al bona mapo ne kredas!

— La viro estas furioza! — konsentis Antipo. — Sed rudristo estas la plej bona, pli bonan vi ne trovos, Siro. Ĉiu dezirus sur vian jaĥton ekstari kiel rudristo, granda estas honoro, kaj mi ĉiam Dion preĝus, se mi povus kun vi en la maron iri, sed juĝante honeste — ne rivalo mi estas al Ivano. Miaj jaroj estas multaj, Siro, absolvu...

Li riverencis malalte: estis timige konduki la caran jaĥton, kaj des pli laŭ iu mapo, al kiu eĉ Rjabov ne fidas. Estu al Ivaĉjo la honoro, sed aliokaze ĝuste li estu punita — la arogantulo, impertinentulo, spitulo.

— Jaroj viaj estas multaj, sed la sperto estas granda! — diris la caro. — Vi iros kiel rudristo sur nia jaĥto, ni iros adori la Solovkiajn sanktulojn — Zosimon kaj Sabateon...

— Jes, Siro! — respondis Antipo.

La koro en la brusto bategis. Dum kiom da jaroj li eĉ ne iradis en la maron! Ho, terure, ho, malbone, ho, pereis Antipo! Estus bone, se tiel la vetero restos! Sed se, savu Dio, hulo leviĝos? Skualo falos? Blovos ventoj malbonaj? Tiam kiele?

Petro ekiris en la kajuton, Antipo kondukis lin per rigardo, ĵetiĝis al Teodoro Baĵenin peti konsilon, kion fari? Sed Teodoro estis staranta kun Rjabov, kaj atendi al Antipo mankis fortoj. Li aliris. Teodoro, karese rigardante per bonkoraj okuloj, tuŝante Antipon per la blanka mano, konsolis, diris, ke probable ĉio bone okazos, ne sola li, Antipo, estos sur la jaĥto, troviĝos bonaj konsilantoj. Timotejev malfeliĉe skuis la kapon, svingis la manon. Tiam nehaste, racie, trankvile ekparolis subite Rjabov:

— Vi, patro, vane afliktiĝis, estas nura afero, ke vi de longe en la maron ne iradis, iĝis negocisto. Sed kiam vi estis rudristo — estis tre bonega, mi ekde la infaneco memoras, kiel ĉe insulo frapis vin hulo...

Antipo turniĝis al Rjabov, suspiris per la tuta brusto, mem rememoris tiun damnitan aŭtunon, rememoris Rjabov-on esti ankoraŭ orfo-ĥaradrio.

— Korpulentiĝis vi iomete, — diris la rudristo, — sed kiam vi en la maron eliros, tuj la juneco al vi, patro, revenos. La sola afero estas malbona — la mapo estas fremdlanda, sed vi laŭ la memoro iros, ja ne forgesis vi la vojon al la Solovkiaj insuloj. Kaj se forgesis, alportos mi hodiaŭ la bastolibron, vi ja scipovas legi...

Antipo diris fiere:

— Kio estos — tion ni ne evitos. Mi parolis pri vi, sed vi estas furioza viro, ĉu vi disputis kun la Siro? La mapo fremdlanda — formanĝu ĝin lupoj! Kio estos, se oni devigos iri laŭ ĝi?

— Sed vi iru laŭ vi, patro!

— Se oni forprenos la stirradon, tiam kiel?

— Kaj vi, patro, laŭ vi, sed kvazaŭ laŭ ili. Vane mi pri la mapo entute diris tiam, ne retenis min, la sango bolis. Evidente, sen ruzeco ne eblas vivi...

Timotejev suspiris, ekpaŝis hejmen por preni pakon, kaj por ankoraŭ pensi en soleco, en silento, cerbumi pri ĉio, kio atendas lin en la maro, fosi en siaj malnovaj mapoj... Survoje li insultadis sin mem:

— Stultulo olda, fosis kaptokavon por aliulo, sed mem ĝin enfalis, nun elgrimpu, se vi povas, kaj se ne povas — neniu ploros pri vi...

En la korto li pro nenio kriis al laboranto, piedbatis la ĉenhundon, en la domo surgenuiĝis antaŭ la ikonujo por preĝi, raŭke kantis unu psalmon, ree koleriĝis, ke li stulte parolis kun la caro, prononcis iajn sennecesajn vortojn: «dokteco, psalmistoj». Kaj Ivaĉjo la tuta estas tia, kia estas, videbla kvazaŭ sur manplato, li ankoraŭ konsolis ĵuse, kaj bonkore, sen malico...

Forgesinte preĝi plu, li staris antaŭ la ikonujo, pensadis: kaj pro kio li malbenis la filinon? Ili vagas en fremdaj domoj, ne havas propran angulon, kaj li mem kiel solulo travivas sian maljunecon...

Ekdoloris la stomako. Li manĝis maceritan vakcinion — ne

helpis. Tiam li komprenis — la animo doloras, vakcinio ne kuracos. Li kuŝiĝis sur la benkon kaj komencis rememori, kiel iam li kiel rudristo revenadis el la maro, kiel kuradis post li knaboj, rigardadis al la vizaĝo: venis de la maro Antipo mem, estis grandega ŝtormo, sed li kvazaŭ ne rimarkis! Sed nun? Kio estas nun? Ĉu poto da mono, enfosita sub la forno?

Li mem kolektis por si aĵojn por la pako, pensante malgaje: al li, Ivaĉjo, ja Taisja kolektas. Li nodis la pakon, ekiris per ritmaj paŝoj, kiel en la foraj jaroj, survoje pensis: Krikov, jen, Atanazio Petroviĉ, estis leŭtenanto, nun iĝis kaporalo, se li ankaŭ plu tiel plenumos la caran servon, promociiĝos al soldato, kaj tiam estos proksime al bagnulo. Kaj Ivaĉjo, la popolo diras, leviĝas supren — kun caraj homoj pasigas tagojn kaj noktojn, el la severa monaĥeja malliberejo la fiŝistojn liberigis — sekve, grandan forton havas la homo. Eble, destinita estas al Ivaĉjo Rjabov nemalgranda sorto?

Kaj per kio li estas malbona, per kio tiom ne konvenas la rudristo Rjabov?

Eble, repaciĝi?

Ĉe la drinkejo li staris iom — ĉu drinki por forto en la korpo, sed maldecidis, li de longe ne drinkis, kaj lia aĝo ne estas tia, ke la Magrula drinkaĵo utilu. Li trinkis ŝaŭman kvason ĉe virino sur la transpasejo, ordonis al avo Ignato transporti lin sur la Mosean insulon. La avo transportis kun plena respekto — en la urbo Arĥangelsko Antipo Timotejev estis ne la lasta homo.

Sur la jaĥto — apud la stirrado, sub la suno — li kuŝiĝis por dormeti kaj vekiĝis, kiam oni jam intencis debordiĝi. Jam estis bruantaj la tabuloj de la ŝtuparoj, la caro kriadis en ledan

paroltubon, kian haŭserojn kie malligi, la sekvantaranoj en Preobraĵenskaj kaftanoj rapide, lerte laboradis kiel matrosoj, sur ferdekoj, sur pobkastelo kuradis nudpiedaj marlaboristoj, plenumadis la ŝipan laboron.

«Kie do estas Rjabov?» — kun timo kaj angoro pensis Antipo, leviĝante sur la piedojn.

— Ĉi tie mi estas, ĉi tie, patro! — kvazaŭ legante en lia kapo, diris Rjabov.

Li estis sidanta apude, sur kabla volvaĵo, per gajaj okuloj rigardadis ĉiuflanken, kiel laboras sur la ŝipo la caraj sekvantoj kun la Blankmaraj fiŝistoj. La caro plu kriadis en la tubon, knaradis blokoj, barko sur remiloj estis tiranta la jaĥton sur la Dvinan ŝanelon...

— Do, patro, ekstaru al la afero! — nelaŭte diris Rjabov.

Antipo krucosignis sin, metis la manojn sur la stirradon. Ĉiam pli larĝa iĝadis la akvostrio inter la kajo kaj la jaĥto. Kun krioj flugadis mevoj, malalte preterante la ŝipon, ree leviĝadis en la ĉielon. Antipo ankoraŭfoje turnis la stirradon — la jaĥto estis eliranta sur la ŝanelon de plenakva Dvino.

— Jen, kiel ni bone eliras! — ree diris Rjabov. — Kaj vento por ni estas bona, kaj rudri vi, patro, ne mallernis. Atendu, vi ankoraŭ kondukos brigadon, tiaj rudristoj ĉe ni raras...

Antipo memkontente ridetis, dismetinte la piedojn pli larĝe, respondis base:

— Espereble, ni sukcesos...

5. Malfacila marvojaĝo

Hispano Álvarez del Robles venis sur la caran jaĥton solene

kaj estis akceptita kun honoro, konvenanta al multesperta kaj dokta navigisto. Dismetinte sur la tablo en la cara kajuto holandajn mapojn de la Blanka maro, del Robles diris kun graveco:

— Ĉi mapoj, granda Siro, estis veturigitaj sur nia «Ora nubo», kaj kvankam ni ne uzis ilin, tamen ni povas garantii ilian ĝustecon, ĉar ili estis elfaritaj de estiminda kaj nesuperebla majstro kaj lertulo, kiu estas tiom sperta en sia afero...

Teodoro Baĵenin ĝentile, sed firme interrompis la hispanon:

— La mapo, kiu estas dismetita ĉi tie, estas malĝusta!

Petro kolere demandis:

— Sed vi ja de kie scias?

— Mi scias, Siro, mi plurfoje iradis ĉi vojon. La gorĝo estas montrita sur la holanda mapo ĝuste, sed tio, kio estas antaŭ la vojo al la Solovkiaj insuloj — malĝuste. La Somera bordo jen kien turnas. Kaj la Una golfo estas ne ĉi tie, ne konas la fremdlandanoj niajn lokojn, el la kapo elpensis la mapon...

Kaj li deiris de la tablo.

Romodanovskij, klininte la kapon kiel kolera bovo, estis ĉirkaŭrigardanta la homojn — kiun akuzi? Menŝikov kliniĝis al Nariŝkin, diris per intence timigita voĉo:

— Dronos ni, bojaro, je Dio dronos. Antaŭnelonge kokino kiel virkoko kokerikis, tio estas ĝusta antaŭsigno...

Nariŝkin flustris al la najbaro, Streŝnev faris larĝan krucosignon kun timo en la okuloj, dumaa sekretario Zotov svingis furioze la manon — pereis ni, kion nun diri, se ni nian

vojon ne scias. La ludmaristoj Voronin, Ievlev, Apraksin perplekse interrigardis. Ĉefepiskopo Atanazio mallonge ridegis:

— Fripono li estas, sed ne ŝipestro, via estiminda fremdlandano. Voku la rudriston, kun li paroli necesas, sed ne kun ĉi nudkrurulo...

Ievlev venigis Rjabov-on, tiu alportis noditan pakon, garde malnodis, metis sur la tablon libron en malnova leda bindaĵo, malfermis. Petro, malalte kliniĝinte, rapide laŭtlegis:

«Ĉi marvojaĝa libro estas kunmetita honeste kaj ĝuste en bona ordo, laŭ kiu maristoj, marlaboruloj trovas ĉiujn danĝerajn en maro lokojn kaj per tio savas sian vivon...»

La caro levis la kapon, ĵetis mallongan rigardon al Rjabov, abrupte movis la ŝultron, komencis foliumi la libron plu, serĉante mapojn: trovis unu — manĝis ĝin per la rigardo.

— De kie estas ĉi libro? — demandis Apraksin.

— Ĉe vidvino troviĝis! — respondis Rjabov. — Estis bona rudristo avo Mokeo, forprenis lin la maro, li mem scipovis legi, skribadis.

— Naviga gvidlibro! — diris Petro per gaja laŭta voĉo. — Aŭskultu, Silvestro Petroviĉ...

Kaj li ree komencis laŭtlegi, stumblante sur nekonataj vortoj:

«Kiam Dvino degelos, ni sur niaj ŝipoj hastas post la glacio. Tra la golfo kaj preter la Vintra bordo ni gaje kuras, kiam la vento kaj rapidfluo portas. Ĉe la Orlovaj rifoj kvankam abundas glacipecegoj, tamen *salmao* troviĝos, ni trairos». Kio

estas *salmao*?

— Ja markolo, en nia maniero — salmao! — diris Rjabov.

— Kial estas dirite ĉi tie pri rifo — subakva ŝtono — «nur necerte»? — demandis Petro, almontrante per la fingro la libran folion.

— Mi, Siro, legi ne scipovas, — diris Rjabov, rigardante en la ruĝvangan vizaĝon de la caro. — Sed se oni skribas «nur necerte», tio signifas, ke tiu ĉi marlaborulo ne trompas marvojaĝanton kaj nur avertas por ajna okazo...

La gvidlibron ili legis longe, ĝis ŝanĝiĝis vento kaj ekŝaŭmis per ondokrestoj la maro. Antaŭ ol foriri el la kajuto supren, Petro ordonis al Ievlev kaŝi la libron en fidindan lokon. Vespere la maro komencis tiel svingi la jaĥton, ke del Robles timiĝis kaj por vigleco drinkis rumon. Dufoje avo Teodoro kaj Rjabov avertis la hispanon, ke necesas malhisi la velojn, povas bati skualo, tiam ne okazu malfeliĉo. Del Robles ne obeis. Skualo vere batis, la nemalhisita velo krevis kun bruego, simila al kanona pafo. Ŝnuroj kun fajfo dishakadis la aeron, ŝaŭma kolera ondego superkovris la pobkastelon, forportis distriĝintan fiŝistan filon Moĉjon, barelon kun grio, rezervajn tabulojn. Antipo staris ĉe la stirrado senmove, liaj okuloj rigardis firme, li metadis la ŝipon transverse de la ondo, kiel en la foraj junaj jaroj. Rjabov aliris lin proksime, demandis:

— Eble, vi ripozos iomete, patro?

— Poste!

La subdiakono kaj la sakristiano de mastro Atanazio estis muĝantaj sur la ferdeko diservon pri savo de kristanaj animoj; la bojaroj, ĝemkriante pro timo, faradis malgrandajn

krucosignojn, promesadis al Dio grandajn bastonkandelojn, se ili atingos firmaĵon, malhelpadis al la matrosoj, kriadis, ke oni turnu al la bordo. Atanazio kun Patriko Gordon staris apud la masto, ambaŭ nudkapaj, kvazaŭ elhakitaj el kverko, disputis pri la kredo. Gordon miksadis rusajn frazojn kun Latino. Atanazio, viŝante la vizaĝon de salaj ŝprucoj, aŭskultis atente, iam subite furioze kontraŭante.

— Sed vi estas... kolera! — diris Gordon.

— Nun mi laciĝis, sed en la pasintaj tempoj mi, vere, estis minaca.

— Ĉu estis vi, kiu al iu la barbon elŝiris en koncilio?

Atanazio bonanime ekridis:

— Furioza skismulo Nikito Profananto en la Faceta Palaco[65] atakis min, kaj elŝiris mian barbon. Iradis mi poste kun nuda vizaĝo, hontinde. Malfruis mi iomete, se mi scius — mi al li, hundaĉo, mem la unua la barbon elŝirus...

— Ankaŭ la katolikoj kaj la protestantoj — ĉiuj batiĝas, — diris Gordon. — Malbone...

---

65 Nikito Dobrinin, alnomita Profananto (Пустосвят) fare de liaj oponantoj, estis pastro, kontraŭulo de la eklezia reformo de patriarko Nikono. Li estis ekskomunikita kaj malliberigita en 1666 pro sia kritiko de la reformo, poste liberigita sen redono de la ordino. En 1682 okazis debato pri la kredo en la Faceta Palaco (Грановитая Палата) en ĉeesto de la caroj (tiam tio estis carino Sofia kaj ŝiaj junaj fratoj caroj Ivano kaj Petro). En la furiozaj debatoj okazis interbatiĝo, la debatoj finiĝis sen ajna rezulto. Elirinte el la Faceta Palaco, Nikito kaj liaj adeptoj laŭte proklamis sian venkon. En la sekva tago Nikito estis kaptita kaj mortekzekutita, kaj liaj adeptoj estis ekzilitaj al monaĥejoj. La malnovritanoj ĝis nun agnoskas lin «kolono de la ortodoksa kredo», dum episkopoj de la oficiala ortodokskristana eklezio menciadis lin kiel krudan, malutilan, malkleran (Profanantan) skismulon *(trad.)*.

— Sed ĉu vi ne batiĝas?

— Mi ne estas popo.

— Sed ĉu popo ne povas batiĝi? Jen, vi estas generalo, kaj mi popo, se ni interbatiĝos sur la tero en deca loko — kiu kiun venkos? Per spado piki mi ne estas instruita, sed per la pugnoj mi pli kapablas. Ĉu vi batiĝos kun mi?

Gordon ne respondis, komencis fiksrigardi la bordojn, je kiuj kun bruego frakasiĝadis fortikaj maraj ondegoj.

— Ĉu al vi ne estas enue vivi, generalo? — demandis Atanazio.

— Okazas, ke tre enue! — diris Gordon.

— Ankaŭ al mi okazas, ke estas malfacile. Tiele malfacile. Por kio, mi pensas, ĉio ĉi? Ne, ne kortuŝe, ne...

Aliris Petro, mordetante la grandajn lipojn, komencis fiksrigardi, ĉu malfermiĝos la golfo, por atendi tie, saviĝi de la ŝtormo.

— Pelu for, Siro, la friponon damnitan, fraĉon, — diris Atanazio, — kia li estas ŝipestro? Metu Rjabov-on kiel ŝipestron — ni saviĝos. La rudristo estas sperta, la fremdulo al li nur malhelpas. Je Dio, tiel...

— Ĉu fremdulo estas fripono? — demandis Gordon.

— Ankoraŭ ni nomas fraĉo, — kun subrido respondis Atanazio.

— Ĉu ankaŭ mi estas fraĉo?

— Dio scias, — mallarĝiginte la okulojn al Gordon, diris la mastro. — Mi kun vi panon-salon ne manĝis, aferojn ne faris...

Petro aŭskultis Atanazion, ordonis al la hispano fordoni al Rjabov la paroltubon. La fiŝistoj ekkuris sur la ferdeko pli rapide, la tumulto ĉesis, la homoj komprenadis komandajn vortojn. Tion, kio estis nekomprenebla al la ludmaristoj — tradukadis Ievlev. Apraksin, Voronin, Menŝikov entreprenis fiksi transportaĵojn, por ke ili ne trabatu la ŝipflankon. Eĉ grasa Romodanovskij estis trenanta kun Semisadov ŝnuron — savadis sin de pereo en profundo. Sur la pobo la cara popo Bazilo elpensis konfespreni kaj komunii dezirantojn, sed tiuj ne troviĝis. Avo Teodoro intencis, sed pro tempomanko forgesis. Nikito Zotov, ebrieta, sidis en angulo post bareloj, trinkante el botelo, vokadis per la fingro al si popon Bazilon: ni drinku, patro, duope, estos pli gaje. Por ke ne forportu ondo, Streŝnev alligis sin per ŝnuro al sakoj, la sakoj rampis sur la ferdeko tien kaj reen, Streŝnev ĝemkriadis...

— Ĉu malbone? — demandis Atanazio Rjabov-on.

— Jen ili, la Unaj kornoj, malfermiĝis! — diris Rjabov. — Vidu, jen kabo Ruĝmonta korno! Jen monto Gribaniĥo. Kaj jen la Jarenska korno. Antipo tien iras. Tie estas subakvaj ŝtonoj, se al la ŝtonoj nin ne ĵetos ondo — ni trairos. Trairi, vere, estas malfacile. Jen, polvas tempesto...

En pluveto, en akva polvo potencaj ondegoj surruliĝadis ĉebordajn ŝtonojn, leviĝadis supren, flav-blanka ŝaŭmo bolis apud la bordoj. Kaj ju pli proksime aliradis la jaĥto la savan havenon, des pli klare videblis, kiel malfacile estas eniri ĝin sen erari pri ŝanelo kaj sen trafi subakvajn rokojn.

Deĵetinte de sur la larĝaj ŝultroj la tramalsekan kaftanon, en ĉemizo, disbutonita sur la brusto, en fiŝistaj botoj, kun grizbluaj pro malvarma vento vangoj, trankvila, ne fleksiĝanta sub

ŝrikanta ŝtorma vento, Antipo senmove staris ĉe la stirrado, mezurante per la rigardo la rapidantajn renkonten bordojn de la Una golfo.

Ĉiuj eksilentis ĉirkaŭe.

Neniu eĉ krucosignis sin en tiuj teruraj sekundoj. Kun sovaĝa forto portis la tempesto la malfortikan ŝipeton, kiel ŝajnis, rekte al la ŝtonoj. La vento ŝrikadis, hurladis, ĝemadis en mil manieroj. Bruegis ondoj, frakasiĝante je nigraj ŝtonoj, kaj ne eblis kredi, ke la ŝipo evitos la frakasan lastan baton...

— Kien? — demandis Petro, akre fiksrigardante Antipon.

— Kien necesas, Siro, — preskaŭ trankvile respondis Timotejev.

— Al subakvaj ŝtonoj vi iras! — kriis Petro.

Kaj, farinte ankoraŭ paŝon antaŭen, li firme kaptis la stirradon.

— Foriru, Siro! — kun severa forto ordonis Antipo. — Mia estas la loko ĉi tie, sed ne via. Mi scias, kion mi faras!

Petro retropaŝis, Antipo plu prokrastis. Mallarĝiginte la okulojn, li estis kalkulanta kuron de la ŝipo, ondon, forton de la vento, ŝanelon, sekuran de subakvaj ŝtonoj. Li kvazaŭ estis celanta. Tiel celas pafisto al iranta al li urso: se li mistrafos — morto...

Kun knaro, kun grinco ekturniĝis la stirrado, la jaĥto preskaŭ kuŝiĝis sur la flankon, surfoj sur la nigra subakva roko restis maldekstre, Antipo abrupte turnis la stirradon refoje, la ŝipo estis iranta laŭ la ŝanelo, la danĝero estis malantaŭe, la vento bruis ne tiel feroce, Antipo estis ĉirkaŭiranta alian vicon

da ŝtonoj. Antaŭe en mallumo montriĝis konstruaĵoj de Pertominska monaĥejo, ligna, nigriĝinta pro aĝo sonorilejo, kupolo, muroj...

Rjabov frapis Antipon al la ŝultro, tiu turniĝis — pala, maldikiĝinta, kvazaŭ alia homo.

— Nu, patro! — diris Rjabov. — Vi ankoraŭ longe povas esti rudristo! Tro frue vi eksidis sur fornon...

— Prenu la stirradon! — respondis Antipo. — La gorĝo sekiĝis!

Avo Teodoro donis al li akvon en kruĉeto, li eltrinkis unuglute, svingis la kapon. Tiutempe la caro prenis lin ĉe la kubuto, per la alia mano brakumis je la kolo, kliniĝis, kisis trifoje, ordonis, ke oni alportu vodkon.

— Ĉapon al li mian kaj kaftanon! — kriis Petro.

Menŝikov, ridetante per gajaj okuloj, staris senmove, sur pleto tenis glaseton da vodko kaj kuketon. Antipo eltrinkis la vodkon, viŝis la barbon, komencis surmeti la caran kaftanon. La kaftano estis tro granda por li, la maljunulo staris, ridinde dismetinte la brakojn, palpebrumante per la ŝvelintaj laciĝintaj palpebroj. Menŝikov donis la ĉapon. Antipo prenis ĝin per ambaŭ manoj, surŝovis sur la grizan kapon, ree rigidiĝis. Petro fosis en la monujo, etendis al Antipo ĉervoncon.

— Do, kio... — diris Antipo. — Kiom da jaroj mi travivis, ne ebriiĝadis, sed hodiaŭ mi pekos je via, Siro, sano. Pardonu!

Petro ekridis, respondis per raŭkiĝinta sub vento voĉo:

— Hodiaŭ ni ĉiuj pekos, rudristo! Kiam peki, se ne hodiaŭ...

Post kiam la caro kaj la sekvantaro deiris de la jaĥto, Rjabov

kun subrido diris al Antipo:

— Eble, patro, pro la hodiaŭa tago vi ankaŭ min kaj Taisja-n pardonos?

Antipo pripensis:

— Eble, pardonos. Demetu de mi la caran kaftanon, — la tago estas labora, por kio ĝin trivi. La ĉapon kaŝu. Kaj la ĉervoncon ni fordrinkos!

6. «Amikeme instruis»

— Banejon, banejon hejtu urĝe! — ordonis Petro al la estro de la Pertominska monaĥejo kaj, kliniĝinte, por ne batiĝi per la frunto al la lintelo, eniris en malaltan, varman, sufokan ĉelon.

Sur la sonorilejo senbride, alterne, gaje, kvazaŭ por Pasko, estis sonorantaj la sonoriloj, monaĥoj-fiŝistoj staris en la monaĥeja korto kun malfermitaj buŝoj, kredante kaj ne kredante, ke la caro mem Petro Aleksejeviĉ venis en ilian malriĉan, foran monaĥejon. Kaj Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov jam estis mastrumanta kaj ordonanta, kiel kaj per kio regali la caron, kien veturigi trabojn por kruco, kiun elhakos Petro Aleksejeviĉ mem memore al sia mirakla saviĝo, kie estu cara dormejo, kien loki la malsekiĝintajn kaj malvarmiĝintajn sekvantojn. Pli aĝaj bojaroj estis humile preĝantaj sur la perono de la monaĥeja preĝejo, kisante la ŝtonajn ŝtupojn, krucosignadis sin, plorante per feliĉaj larmoj, skoldis la timigitan monaĥejan intendanton, ke mankas en la monaĥejo karaj bastonkandeloj...

En la maro plu fajfadis vento, levadis ŝaŭmajn nigrajn

ondegojn, la ondoj peze faladis, frakasiĝante je la bordo. Grizaj nuboj estis rapide kurantaj sur la ĉielo, iam subite verŝiĝadis mallonga pluvego, poste la ĉielo ree puriĝadis, heliĝadis...

Maljuna monaĥo kun infana rigardo de la bluaj okuloj riverencis al Ievlev kaj Apraksin, kondukis post si en ĉelon por ripozo. Ĉi tie, sur larĝa benko, kovrinte sin per kaftano, metinte la kapon sur vojaĝan kusenon, estis dormanta homo per forta junula dormo...

— Kiu estas? — demandis Apraksin la monaĥon.

La monaĥo ne sukcesis respondi, Silvestro Petroviĉ rekonis princon Andreon Jakovleviĉ-on Ĥilkov-on, gaje skuis lin je la ŝultroj, ordonis leviĝi. Ĥilkov per dormema rigardo longe rigardis al Ievlev, poste ekkriis:

— Ĉu la marvojaĝanto glorinda?

Kaj li abrupte ekstaris de la benko, ĝojante pri la neatendita renkontiĝo.

— Ĉu vi vere mare venis?

— Mare! — diris Ievlev. — Kaj vi kiel fartas, kara princo?

Ĥilkov, surmetante la kaftanon kaj butonante sin, mallonge rakontis, ke li vojaĝas jam dum longa tempo tra monaĥejoj, legadas kronikojn, faras de kelkaj, plej interesaj, kopiojn por Rodiono Kiriloviĉ Poluektov. Forgesinte kombi la harojn, ne piedvestinte sin, li elprenis el sub la benko, sur kiu li dormis, feritan kofreton, malŝlosis ties bulban, rondan artifikan serureton kaj elmetis sur la kverkan tablon amason da folioj, plenskribitaj malgrandlitere. Apraksin etendis la manon, Ĥilkov tuta kvazaŭ hirtiĝis, petis:

— Vi, Teodoro Matejeviĉ, pro Dio, unue sekiĝu. Jen de vi akvo fluas...

Apraksin subridis — tre ĉarma montriĝis Andreo Jakovleviĉ kun sia timo, ke oni difektos liajn valoregajn foliojn...

— Ĉu vi kredas, Silvestro Petroviĉ, — arde kaj ĝoje estis diranta Ĥilkov, — la dekstra brako rigidiĝis pro skribado. Ekde la ŝultro mem ĝi estas kvazaŭ fremda. Papero finiĝis, mi apenaŭ elpetis de la solovkia prioro. Nun ĝi denove finiĝis. Eble vi donos almenaŭ iomete...

Kaj, ne aŭskultante la respondon, li ree remetadis siajn foliojn, legante kaj rakontante pri tio, kiel en la Solovkia klostro troviĝis kroniko de ĉiuj forgesita — jen el ĉi kroniko kelkaj rimarkindaj historioj...

Trans la fenestro, ekstere, denove estiĝis mallumo; Ĥilkov elbatis fajron, bruligis kandelon en vojaĝa kandelingo, komencis legi pri la sveda sieĝo de Pskovo, pri heroeco de vojevodoj Morozov, Buturlin kaj Gagarin, pri tio, kiel venis fino al sveda armeestro Evert Horn, mortigita de bravaj rusaj homoj. Apraksin estis ŝanĝanta sian veston en la angulo de la ĉelo, sed aŭskultis atente, Silvestro Petroviĉ de tempo al tempo eligadis fumon el sia pipo. Andreo Jakovleviĉ legadis per egalmezura voĉo, trankvile, kiel postulis la linioj de la antikva kronikisto, sed lia maldekstra mano pro interna emocio ofte kunpremiĝadis en pugnon, kaj estis videble, kiel arde li kunsentas la sieĝitajn pskovanojn kaj kiel ĝojas pri ilia heroaĵo.

Sen frapo eniris Aleksandro Daniloviĉ, skoldis, ke ili ne iras vespermanĝi, sed Apraksin minacis al li per la pugno, kaj li eksilentis. Ĥilkov estis leganta alian folion pri Novgorodo, pri tio, kiel la svedoj prirabis preĝejojn kaj ekzekutis honestajn

bonajn homojn, kiel estis amare fordoni al la svedoj rusajn urbojn Ivangorodon, Jamon, Koporjon, Oreŝkon. Menŝikov kolere ektusis, eksnufis per la nazo, diris, ke prefere ili vodkon drinku, ol aŭskultu jenan malĝojaĵon...

— Ĉu Siro jam ŝvitbanis sin? — demandis Apraksin.

— Li jam dum ioma tempo konversacias kun la rudristoj...

Ĥilkov miris — ĉu vere Petro Aleksejeviĉ estas ĉi tie? Aleksandro Daniloviĉ ekridegis, ekskuis la kapon — kia stranga homo estas la princo, malantaŭ siaj folioj la caron ne rimarkis...

En la monaĥeja refektorio estis brulantaj kandeloj, da monaĥoj ne estis eĉ unu. Petro, kun brilanta post la bano vizaĝo, kun malsekaj, tre krispaj haroj, sen kaftano, kun pipo en la mano, ridetante iradis sur knarantaj plankotabuloj, abrupte movante la ŝultron, aŭskultis rakonton de Rjabov pri pomoraj marvojaĝoj. Ĥilkov malalte riverencis. Petro subite gaje palpebrumis al li kaj minacis per la fingro, ke li ne malhelpu aŭskulti. Rjabov nehaste, same kun rideto, estis rakontanta:

— Ni iras, supozu, sen vento, laŭ rivero malsupren. Por kio pri la profundfluo, pri la ŝanelo, kiel vi degnas diri, pensi? Nu, tiam arbeton ni alligas al la barko — malgrandan pinon aŭ piceon. Ĝi estas malpeza, la akvo ĝin portas kiel necesas — laŭ la ŝanelo antaŭ la barko, kaj por ni restas nur de malprofundaĵoj per stangoj depuŝiĝi...

Petro ekridis:

— Kiaj ruzuloj, kiaj bravuloj! Kion vi ankoraŭ elpensis?

— Multon, Siro, ĉu eblas rakonti pri ĉio? Ankoraŭ oleon...

— Kian oleon?

— Ja fokan. Ni, kiam en la maron iras, barelojn havas kun oleo. Se batos tempesto, ni la oleon el la bareloj en sakojn pretas transverŝi kaj atendas malbonan momenton. Kiam venos tempo preĝi, por si mortopreĝon kanti, ni kun tiu kantado la sakojn en la akvon sur ŝnuroj mallevas. La oleo ondadon kvietigas...

Antipo Timotejev, ruĝa pro drinkita vodko, gravmiene glatigante la barbon, kapjesadis — vere, ni tion faras, okazas. Avo Teodoro same kapjesadis. Hispano del Robles, pririgardante la tablon el sub la frunto, kelkfoje intencis enmiksiĝi, sed oni lin ne aŭskultis. Finfine, kun peno elektante rusajn vortojn kaj miksante ilin kun germanaj kaj anglaj, li diris, ke por la rusoj venis tempo ĉesi konstrui platfundajn ŝipojn, tiaj ŝipoj estas sentaŭgaj, ili estas kliniĝemaj kaj malbone regeblaj sur ondo. Rjabov kuntiris la brovojn kaj moke respondis:

— La kila ŝipo estas bona afero, sed ne por ajna laboro. Sur la kila laŭ nia spuro post platfundaĵoj oni ne ĉiam trairos. La kila ŝipo specialan havenon postulas, dum ni de hulo ĉie kaŝiĝos kaj vintrumos kie Dio donos. Ni havas malgrandan enakviĝon, ni al ajna bordo aliros. Se nin enpremos glacio, ni nian platfundan boaton eĉ sur glacipecon eltrenos per vinĉo, sed kun la kila ni pereus. Kaj sekiĝon ni ĉe malfluso ne timas, sed la kila sekiĝos — kaj fino. Jen, instruas instruistoj, sed mem nur laŭ nia spuro iras...

— Instruiĝi ja estas pri kio! — interrompis li Petro. — Ni tro majstras tro fieriĝi...

— Se estas pri kio — tio al ni ne malhelpas, — trankvile

diris Rjabov, — sed, Siro, se ankaŭ la instruisto nenion komprenas...

Petro frapis per la pipo al la tablo:

— Ni poste rezonados. Diru la aferon!

— Se la aferon, do jen la afero. Antaŭ nelonge ĉi marnavigisto ridis, ke ni, pomoroj, niajn ŝipojn per lignoŝnuroj kudras, najlojn ne havas. Sed niaj boatoj kaj barkoj, per lignoŝnuroj kudritaj, tie iras, sinjoro ŝipisto, kie vi eĉ en sonĝo ne vidis vin esti. Ŝipo en glacioj loziĝos, najlo elfalos, ankoraŭ likado aldoniĝos. Sed lignoŝnuro pro akvo ŝvelas, pro ĝi neniam estos likado...

La hispano silentis, orgojle rigardante al Rjabov, la fiŝistoj subridadis en la barbojn, — faris la rudristo al la fremduloj bonan lavon, ili eĉ ne havas, kion respondi...

En la estiĝinta silento subite aŭdiĝis trankvila voĉo de Ĥilkov, kvazaŭ pensanta voĉe:

— Tiele, Siro, ĉi rudristo ĝuste diras. En la printempo estis mi en la Solovkia klostro, kaj ties arĥimandrito Firso donis al mi kopion de hagiografio de Barlamo Kereta, de antikva manuskripo de la dekkvina jarcento...

Petro kun miro ekrigardis al Ĥilkov, kvazaŭ ekvidis lin unuafoje, demandis abrupte:

— Kia Barlamo? Pri kio vi parolas?

— Pri la kroniko de Kereto, Siro, kie estis dirite tiel, ke mi firme memorfiksis kaj pensas — ĉiuj viaj ŝipistoj tiujn vortojn de la kroniko por ĉiam bezonas scii...

La voĉo de Ĥilkov eksonoris, la vizaĝo ekbrulis, kun

firmeco kaj forto li prononcis:

— Estis dirite de la kronikisto Kereta: «sed ankaŭ gento lia iradis al la varengoj, liverante al ili ŝipojn por ilia mara bezono, kaj tiun ŝipan arton amikeme instruis»... Ne nin la varengoj, sed ni ilin instruis ŝipojn por marirado konstrui.

Kaj Ĥilkov ripetis:

— Amikeme instruis!

La vizaĝo de Petro mildiĝis, li ekrigardis rekte en la okulojn de Andreo Jakovleviĉ, diris kun neatendita malgajo en la voĉo:

— Amikeme instruis. Bonaj vortoj! Brave dirite!

Kaj, apogiĝinte per la mano sur la ŝultro de Patriko Gordon, li ankoraŭfoje ripetis:

— Ĉu vi aŭdas, sinjoro generalo kaj admiralo kaj kio vi ankoraŭ estas ĉe ni, mi forgesis. Ĉu vi aŭdas? Amikeme instruis. Je tio ni hodiaŭ drinkos... Verŝu al ĉiuj, kaj ne avaru, sinjoro Gordon!

Matene en la refektorio de la monaĥejo restis Petro, Apraksin, Menŝikov, Gordon, Voronin, Ievlev kaj Ĥilkov. La marlaborulojn, laciĝintajn dum la tempesto, venkis forta dormo. Antipo Timotejev, ebriiĝinte, komencis sakri, Rjabov forkondukis lin. La bojaroj estis de longe ronkantaj en la sufokaj monaĥejaj ĉeletoj, dum dormo ĝemadis, ekkriadis, vidadis sin dronintaj en la mara profundo. Hispano del Robles, ŝovinte duonstofan boteleton da vodko en la poŝon de la kaftano, foriris dormi sur la jaĥton...

La ŝtormo en la maro iĝis eĉ pli kolera, sala vento estis blovanta kun forto de uragano, sonoriloj en la sonorilejo

sonoris per si mem pro batoj de la tempesto. Kaj en la refektorio estis kviete, varme, ĉiuj sidis en unu angulo, per la manoj el unu komuna plado manĝadis freŝan frititan hipoglosaĵon kaj disputadis, interrompante unu la alian.

— Sed vi eraras, Andreo Jakovleviĉ, princido! — viŝante la manojn je la kamizolo, estis diranta Petro al Ĥilkov. — Eraras, kara amiko! Kio estas viaj popoj? Pri kio ili instruos? Atendu, lasu min diri! Pri la Sankta Skribo ili instruos, sed ne pri tio temas...

— Maristojn ni bezonas jen kiele! — firme kaj kategorie diris Apraksin. — Navigistojn!

Petro forsvingis:

— Atendu vi kun navigistoj! Pri nenio vi aŭskultas, krom pri navigistoj, jen homo. Multon alian ni bezonas ne malpli: militajn artojn, Marsajn, bonajn kanonojn, ŝipojn necesas konstrui kilajn, militajn, sciencojn matematikajn same necesas scii. Deiru, Patriko, ne malhelpu!

— Rusa homo ĉio povas, — surfalante per la brusto sur la ŝultron de la caro, diris Gordon. — Mi vidas, jes, mi scias. Lernejo necesas, tre bona lernejo necesas havi. Mi vidis ĉe Koĵuĥovo, mi ĉiutage vidas, ho, Peter, mi vidis ĉio. Mi scias...

Petro ekridis, forpuŝis Gordon-on, diris karese:

— Dormi al vi tempas, sinjoro generalo. Forkonduku lin dormi, knaboj...

Sed Gordon ne permesis al Menŝikov, ekkantis malnovan skotan kanton. Oni ne aŭskultis lin. Teodoro Matejeviĉ estis diranta, frapante per la manplata eĝo al la tablo:

— Hodiaŭ, kaj ankaŭ en ĉiuj tagoj, en Arĥangelsko pasigitaj, vi, Siro, bonvolis vidi, kiaj marlaboristoj estas la pomoroj. Se doni al ili navigan lernejon — ne troveblos pli bonaj maristoj...

— Vi nur pri maristoj pensas, kvazaŭ ili estas solaj en la mondo! — diris Petro. — Pri alio ni parolas. Pri tio ni pensas, kia granda profito povas esti por la ŝtato, se homoj, similaj al tiuj, kiuj kun ni sur la jaĥto iris kiel matrosoj, verajn sciojn ricevos. Tia lernejo necesas, ke se ajna homo venus — li mem en ĝi restus lerni kaj kun diligento uzus ĝin. Kiel do tiajn lernejojn fari? Kiel? Lernejojn, por ke oni tie instruu la doktoran, kuracan arton, la fortikaĵ-konstruadon, kaj la ercan aferon, kaj kiel feron elfandi, kaj kiel domojn konstrui, kaj fortresojn. Kial vi silentas, sinjoroj konsilio? Ne havas kion diri?

Menŝikov respondis malgaje:

— Sed kion ni, Petro Aleksejeviĉ, diri povas? Kion ni mem lernis? La psalmaron kaj la horpreĝaron? A-bo-co? Ko-lo-mo-no?

Ievlev kaj Ĥilkov ekridis, Aleksandro Daniloviĉ tro simile montris, kiel legas lernejanoj. Petro ridetis, plenigante la pipon per aroma tabako.

— La horojn ni scias, la preĝojn matenajn kaj noktajn, la tropariojn. Sinjoroj konsilio! Mia ja lernejo vi mem scias kia estis — en ĉevalejo per kolbrido oni min instruis, kaj en bazaro per batoj. Silvestro Petroviĉ kion mem ellernis, pri tio ĝojas. Sinjoro Apraksin Teodoro Matejeviĉ ĉu multajn sciencojn ellernis dum sia vojevodeco? Li estas nomumita vojevodo, sed nokte li sidas, suferas, subtrahado kaj multiplikado, sed kio ĝi

estas — tiuj gradoj sur astrolabo?

— Atendu, Aleksandro Daniloviĉ! — ekscitite diris Apraksin. — La gradojn nun ĉiuj scias. Mia, Siro, kapo iam ĉi tie entute freneziĝas. Juĝu vi mem. Antaŭ nelonge vintre sendis al mi Aleksandro Daniloviĉ el Moskvo transskribaĵon de la scienco, nomata geometrio. Noktoj ĉi tie estas longaj, mi bruligas kandelojn, sidas, pensas. Nenion eblas kompreni, Siro. La transskribisto, kiu faris tiun transskribaĵon, mem pri geometrio tute nenion komprenas, multajn erarojn faris. Dua transskribisto eĉ pli multe, ol la unua, kaj la tria entute nekompreneble kion transskribis. Por ili estas rido, sed ni devas lerni. En la hieraŭa nokto en Arĥangelsko mi kun Silvestro duope sidis ĝis la mateno mem — li havas unu transskribaĵon, mi alian. Divenadis.

— Ĉu divenis? — ridante demandis Petro.

— Ja ne multe da gajo en tio! — respondis Apraksin.

— La kapo, Siro, ŝvelas, je Dio! — enmiksiĝis Ievlev. — Libroj necesas, tipografioj, por ke estu presitaj libroj!..

— Gazeto necesas! — el sia angulo diris Patriko Gordon. — Por ĉiu tago.

— Kio estas tiu gazeto? — kolere demandis Menŝikov.

— Grande papero. Grande papero...

— Granda! — korektis Apraksin.

— Granda, — konsentis Gordon. — Jen! — Li montris per la manoj, kia devas esti papero. — Kaj sur ĝi diversaj novaĵoj. Ekzemple, reĝo donis aŭdiencon al ambasadoro aŭ princo, aŭ ministro de eksterlanda kortego. Milita batalo. Aŭ, ekzemple,

en Moskvo okazis fulmotondro kaj tempesto. Kaj incendio...

Menŝikov kraĉis, diris:

— Hu, ne alvoku!

— Gazeto estas informilo! — divenis Apraksin. — Bona afero...

— Vere! — diris Petro. — Vere, bona afero...

Kun la pipo en la dentoj li estis pasanta en la refektorio, parolanta konsole:

— Estos, kun paso de tempo ĉio estos. Kaj ke estas malfacile al ni, do kiel alie? Mi mem — ĉu multon scias? Jen Ĥilkov hodiaŭ foliojn rakontis, kiujn trovis en la Solovkia klostro. Aŭskultis mi, aŭskultadis, kun tuta atento. Kaj hodiaŭ legos tiujn foliojn. La navigan gvidlibron pomoran kiu legos, se ne ni? Ho, laboro por ni, amikoj miaj, ho, aferoj ne kalkuleble multas. La sola estas konsolo — ne maljunaj ni ankoraŭ estas, ĉu, sinjoroj konsilio?

— Ja ankaŭ ne tiom junaj, — respondis la plej juna — Jakimo Voronin: dimanĉe li iĝis dudekunujara. — Ne infanoj jam, Siro...

— Iru, donu fajron, maljunulo! — ordonis Petro, subridinte, kaj, bruliginte la pipon de karbeto, ordonis al ĉiuj dormi.

Kiam ili estis elirantaj el la refektorio, Ĥilkov nelaŭte petis:

— Siro, Petro Aleksejeviĉ, ne ordonu al mi trans la maron veturi kun ambasado, mi petegas, lasu min skribi la intencitan libron. Tio estas mia vivo — la libro...

Petro haltis en vento, kuntiris la brovojn:

— «La kerno»?

— Tiele, Petro Aleksejeviĉ...

La caro eĉ pli kuntiris la brovojn, ili tute kuniĝis super la nazradiko, li ekparolis edife:

— Apraksin Teodoro Matejeviĉ estas bonega maristo, la maro por li estas pli kara ol la vivo, tamen ni nomumis lin vojevodo en Arĥangelsko. Kaj li sukcesas, plenumas la servon bonege. Jakimĉjo Voronin en pasintaj tempoj estis batita de ni multe — petadis resendi lin en lian hejman bienon, tamen li iĝis maristo...

Ĥilkov silentis, mallevinte la kapon.

— Menŝikov Aleksandro Daniloviĉ iam eĉ per larmoj ploras, rezignas la aferon, diras, ke estas malklera. Tamen li laboras, sukcesas. La historion skribi — estas bona ideo, sed kiu iros en Svedion? Ni bezonas ambasadorojn kun kapoj, sed ne ŝlemilojn, ne inojn...

Andreo Jakovleviĉ eĉ pli malalte mallevis la kapon. Petro diris pli milde:

— Tie vi skribos vian historion. Kiu veturos, se ne vi? Vi scias la antikvajn tempojn, la kapo ne estas stulta, honoron de Rusio vi ne rompos. Kaj veturos vi ne morgaŭ, ĝis la vojaĝo vi multon sukcesos...

Ĥilkov riverencis, ekiris al si.

— Nu? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Veturi! — diris Ĥilkov.

— Nu kaj bone! — kuŝante sur benko, respondis Apraksin. — Kiel kiu veturi?

Andreo Jakovleviĉ diris kun suspiro:

— Kiel reprezentanto, kaj fakte — kiel ambasadoro!

— Ĉu vi? Ambasadoro?

— Ambasadoro! — kapjesis Ĥilkov.

— Sed kiom da jaroj vi aĝas?

— Dudek tri.

Apraksin ekridis.

— Jen aferoj! Ambasadoro je dudek tri jaroj. Granda honoro estas al vi, Andreo Jakovleviĉ...

Ĥilkov senvestiĝis, ankoraŭfoje suspiris, kuŝiĝis sur sian benkon. Plu estis fajfanta la mara vento, hurlanta en la tubo, ŝancelanta la murojn de la ĉelo. Silvestro Petroviĉ, sidante ĉe la tablo, estis rapide skribanta:

«Lumo mia, ĝojo de miaj okuloj, kara Manjo. Ĉi folion skribas mi el monaĥejo, nomata Pertominska. Vi nin ĉi-tempe ne rekonus — laboras ni sen ripozo kaj, peke, sen preĝo. De marsalo ni estas multe koroditaj, sur vizaĝoj niaj deskvamiĝas la haŭto, la manoj jukas. Pri vi, kolombino mia, pensas mi tage kaj nokte. Nia monarĥo, Petro Aleksejeviĉ, estas en bona sano, multe da bono estos en nemalproksimaj tagoj laŭ lia volo en Rusujo farita, kaj homoj ĉi tie estas eĉ pli bonaj, ol mi al vi kaj Rodiono Kirilloviĉ rakontis. Dume ni ankoraŭ ŝercas, sed ankaŭ la aferon inter ŝercoj faras. Inklino de nia monarĥo al la maro estas tre granda, kaj ankaŭ ni nun ne tiaj estas, kiaj en Perejaslavlo-Zalesskij en antaŭaj tempoj ludis. Lumo mia, Manjo! Amaras mia vivaĉo sen vi, kara mia sinjorino. Kaj kia estas sorto neniom vidi la junan edzinon, sed verŝajne tio estas

mia destino. Kiam ni ĉiuj al Moskvo revenos — tion mi ne scias. Aflikti vin, karulino, mi ne deziras, sed povas okazi, ke oni ordonos al mi esti en urbo Arĥangelsko ĉe la ŝipa konstruado helpe al Teodoro Matejeviĉ. Tiam ankaŭ vi al mi venos, mi esperas je tio senĉese. Riverencas mi malalte al vi, karulino mia, kaj ankoraŭ al onklo Rodiono Kirilloviĉ, gardu lin Dio en bona sano. Diru al li, Manjo, sinjorino mia, ke la monaĥoj de la ĉi-tiea monaĥejo tiel pigriĝis en sia kvieta vivado, ke eĉ en la preĝejon ne iradas, sed diras al pilgrimantoj: «Vi iru, preĝu, sed ni mem ne iros, nia afero estas sonori, kaj por ni, piuloj, anĝeloj sur la ĉielo preĝas...»

Pro tio la Siro multe pri ili ridis, kaj poste iom la prioron timigis minace, ke pro tiu laborevitado li ordonos la monaĥojn rekrutigi kiel pafistojn..»

Silvestro Petroviĉ finskribis, sigelis la leteron per la sigelringo, kuŝiĝis sur la benkon — dormi almenaŭ horon, — la caro Petro Aleksejeviĉ promesis veki baldaŭ.

Sed dormi li ne sukcesis entute.

Trans la muro, kie devis dormi Menŝikov, tondris la pordo, aŭdiĝis furioza voĉo de Petro:

— Kion do vi, hunda filo, faras? Kion vi...

Estis aŭdeble, kiel Aleksandro Daniloviĉ falis de sur la benko, kiel ien ektrenis lin Petro, kiel Menŝikov lamentas pri si:

— Oj, pereis mia kapo, oj, kulpas mi, oj, Petro Aleksejeviĉ, indulgu, mi ĉion fordonos, ĉion, en la zono ĝi estas ĉe mi...

Aŭdiĝis kelkaj oftaj batoj, tra la ĉeloj flugis krio de Menŝikov. Apraksin sidiĝis sur la benko, fiksaŭskultis,

demandis per rapida flustro:

— Ĉu Daniloviĉ-on?

— Lin, — respondis Ievlev.

— Ĝuste tiel mi pensis antaŭ nelonge, — kun suspiro diris Apraksin. — Ni ĉi tien iris, kaj lin en la korto estis atendanta la prioro. Li tiam en lian ĉelon englitis...

Silvestro Petroviĉ dolore grimacis. Ĥilkov same vekiĝis kaj demandadis, kio okazis. Menŝikov estis hurlanta, sed senteblis, ke li faras tion ne tiom pro doloro, kiom gardante sin de pluaĵo. Petro raŭke kriis trans la muro:

— Per mia cara nomo? Por ŝtataj bezonoj? Latrono, kiel vi permesas al vi!

Ree falis batoj, Menŝikov ŝrikis, aŭdiĝis paŝoj de Petro, la caro foriris. Ievlev intencis iri al Aleksandro Daniloviĉ, sed tiu, plorante kaj mungante sin, eniris mem.

— Nu de kie li eksciis? — de sur la sojlo demandis Menŝikov. — De kie? Kun tiu damnita prioro ni duope nur estis...

— Akvon trinku! — diris Apraksin.

— Iru vi for kun akvo! Kaj mi monon ja nur iomete prenis, la monaĥejo estas aĉa, kion ili havas, tamen li eksciis...

— Ĉu deprenis? — ne povante ne rideti demandis Apraksin.

— Certe, ne lasis. Eĉ kun la zono deprenis...

Menŝikov eksidis, komencis pripalpi sin — ĉu la ripoj estas sendifektaj. La ripoj estis sendifektaj. Tiam li diris kun minaco:

— La mia de mi ne foriros. En Arĥangelsko ni kvitiĝos. Tro

saĝa li estas. La zono ja estas mia!

Kaj li foriris dormi, frapiginte la pordon, kvazaŭ Ievlev, Apraksin kaj Ĥilkov kulpis pri io.

7. Spiras la maro

Dum la tuta tago kaj la tuta sekva nokto la monaĥejo festis la miraklan saviĝon el pereo en mara profundo. Monaĥoj pafadis per kanonoj, trenadis en la refektorion maljunajn monaĥejajn medojn, frititan gadon sur lignaj pladoj, maceritajn en vinagro laktumojn. De sur la jaĥto videblis, kiel la caro kun siaj proksimuloj iris pririgardi la monaĥejan salfarejon, kiel li revenis kaj, preninte en la manojn hakilon, komencis ĉirkaŭhaki trabojn por la kruco, kiel la monaĥoj kaj la caraj sekvantoj fiksis la krucon sur roko...

— Jen kia viro turbulema, la caro! — diris avo Teodoro. — Ĉion li bezonas scii, ĉien li mem iros. Hieraŭ kun la monaĥoj li diskutadis — kiel oni gadon peklas, kaj kiel oni ĝin kaptas, kaj kiel oni grason elfandas...

Antipo estis rigardanta al la bordo morne, pro la postebrio doloris la kapo, estis domaĝe, ke nokte Rjabov elkondukis lin el la monaĥeja refektorio.

— Sen ajna ja respekto! — riproĉis li la rudriston. — Mi jam pardonis vin, sentaŭgulon, sed vi min — je la nuko. Mi memoras, mi kvankam ebria estis, tamen memoras...

Semisadov alportis de sur la bordo de la monaĥoj medon kaj gadon, la matrosoj sur la jaĥto sidiĝis vespermanĝi. Dum la manĝado Antipo deklaris al la fiŝistoj:

— Pardonis do mi Ivaĉjon! Ne por li, damnita, por Tainjo.

Por kio vagi en fremdaj kortoj? Ne taŭgas. Ne tian mi havas enspezon, ke por ili ne sufiĉu. Nu, Ivaĉjo ja laboros, ne sidos sen afero. Mi maljunas jam, miaj jaroj estas grandaj, sufiĉe mi laboris. Kaj la ostoj doloras pro malbona vetero. Kiam estas humido aŭ hulo — simple morto. Kuŝos mi sur la forno, kaj Ivaĉjo mastrumu. Homojn dungu, fiŝistojn, en barko iradu rigardi, kiel por mi la homoj laboras, fiŝon en foiro vendu...

— Pri kio vi parolas, patro? — demandis Rjabov.

— Ja pri vi mi parolas. Estos vi ĉe mia mastrumaĵo. Monon mi, danke al Dio, akumulis, ne mizerulo, ne almozulo estas via bopatro. Vi dungos fiŝistojn, fiŝon de ili prenos, vendos ĝin...

Rjabov subridis, lia ventohardita vizaĝo iĝis kolera.

— Ĉu mi?

— Certe, vi!

— Lasu min, patro.

— Ĉu tro granda estas honoro? Ne meritas? — subridis Antipo. — Ĉu konscienco via ne permesas? Forkondukis ŝtele la knabinon, kaj mi pardonis? Ĉu tiele?

La fiŝistoj-matrosoj de la cara jaĥto silentis, ĵetante rigardojn jen al Antipo, jen al Rjabov. o — Lasu min, patro, — ree diris Rjabov. — Ne iĝos mi via komizo.

Antipo palpebrumis, ne komprenante.

— Ne iĝos, kaj la vorto estas firma! — pli laŭte, severe prononcis Rjabov. — Ne bezonas mi kaj vian honoron, kaj pardonon de vi. Neniam mi estis kaj ne estos sangosuĉanto, kiu pro barkoj kaj ilaro, kiun fiŝistoj per sia ŝvito akiris, ankoraŭ ilin senhaŭtigas. Mi mem por mi estas mastro, kaj mem

dungito...

Antipo leviĝis, kunpremis la pugnon, ekinsultis per sakraj vortoj. Semisadov kaj avo Teodoro pendiĝis sur liaj ŝultroj, tiris lin for de Rjabov. Tiu staris trankvile, poste sen hasto turniĝis, deiris sur la bordon. Antipo kriadis al lia dorso insultajn vortojn, la rudristo ne turnadis sin.

— Ĉu mi estas sangosuĉanto? — demandadis Antipo en furiozo. — Ĉu mi? Ha? Mi al li pardonon, kaj li al mi kion? Nu, latrono, nu, kanajlo, nu, mizerulo, memoros vi min...

La fiŝistoj silentis, interŝanĝadis rigardojn, ridojn. Vespere Antipo tute furioziĝis, stamfadis antaŭ la fiŝistoj, kriadis, ke li ĉiujn tordos, ke neniu aŭdacos kontraŭi lin, lin la caro mem favoras, kaj li nun tian forton ricevos, ke ĉiuj nur aĥos. Avo Teodoro provis kvietigi lin, li piedbatis la maljunulon per la boto. Tiam Semisadov diris kun suspiro:

— Iru, Antipo, kuŝiĝu, ripozu. Vi ebriiĝis kaj bruas. Dum vi antaŭ Ivano Sabateiĉ ja estas malgranda malgravulo... Iru, iru, alie mi povas koleriĝi...

En krepusko avo Teodoro, Semisadov, Rjabov kunvenis en la malvarma kaj humida cara kajuto, bruligis kandelon, komencis pririgardi lasitajn de hispano del Robles marajn mapojn kaj desegnaĵojn. Rjabov, mallerte tenante en la fingroj anseran plumon, trempis ĝin en inkujo, pensis, desegnis dikan strekon tie, kie devus reale esti la Somera bordo.

— Jen, kia kuraĝa! — diris avo Teodoro.

— Ni kiomfoje ĉi tie iradis! — respondis Rjabov kaj, elŝovinte la langopinton, penis korekti la strekon, sed de sur la plumo subite dense gutis inko kaj disfluis sur la mapo.

Avo Teodoro ekridis, ekridis ankaŭ Semisadov. Rjabov kun ĉagreno ĵetis la plumon flanken. Avo Teodoro tiris al si alian mapon — la Blankmaran gorĝon, komencis rakonti, ke kiom ajn li estadis tie, neniam vidis en la gorĝo kontinuan glacion, kaj sen vento tie tio same ne okazadis. Semisadov ekdisputis, avo Teodoro ofendiĝis:

— Junas vi ankoraŭ por min kontraŭi. Jen troviĝis!

Supre sur la ferdeko aŭdigis paŝoj, iu estis rapide malleviĝanta en la kajuton. La fiŝistoj turniĝis — Ievlev, gaja, klarokula, staris en la pordo. Li malrapide aliris la tablon, eksidis, ĵetis rigardon al la mapoj, al la kompaso, atente fiksrigardis la okulojn de Rjabov...

— Kvazaŭ vere marvojaĝantoj doktaj. Pri kio estas la konversacio?

— Ne gravas, — diris Rjabov. — Ni satdormis, kaj nun svingas la langojn.

Ievlev malŝlosis la kofron en la cara kajuto, elprenis la ĉirkaŭvolvitan en ĉifono libron, kiun prenis Rjabov de la vidvino de avo Mokeo.

— Kiu ekbezonis? — demandis la rudristo.

— La Siro postulas.

Rjabov subridis, glatigis la barbon:

— Ekinteresis Petron Aleksejeviĉ-on maro nia. Spiras ĝi al li...

— Kiel — spiras? — demandis Ievlev.

— Ja tiel, Silvestro Petroviĉ, spiras, logas, vokas lin, do. Eliru, diras, marlaboranto, tempas, diras, sopiros vi al mi...

La vizaĝo de la rudristo iĝis serioza, preskaŭ severa.

— Ĉu vi aŭdas? — diris li al Ievlev. — Ondas hodiaŭ...

Tra monotona knarado — la flanko de la jaĥto estis frotiĝanta al la fostoj de la albordiĝejo — Silvestro Petroviĉ klare ekaŭdis potencan bruon de ondoj.

— Ĉu aŭdas?

Silvestro Petroviĉ kapjesis.

— Vi insultas ĝin, kiam ĝi kaptas vin en vojo per tempesto, turmentiĝas kun ĝi, sed ĝi logas, vokas, damnita! — denove ekparolis Rjabov. — Por iu ne gravas — li aŭskultos kaj iros for. Sed alia — ho, ne foriros de ĝi. Jen ankaŭ al vi mi rigardas — vokas ĝi ankaŭ vin, ĉu? Vere?

Li ekridis rule:

— Malfacile al vi estos, knaboj, kutimiĝi. De infanaĝo ja estas multe pli facile, sed kiam la aĝo estas plena — pli malfacile. Ni, lokanoj, ĉiuj estas de la infanaĝo, sed vi estas plenaĝaj viroj, jen, kaj en la maron iras unuafoje.

— Ili kutimiĝos! — diris avo Teodoro. — Mi unu ulon konis — ĉirkaŭ dudek jarojn li aĝis, kiam nur la unuan fojon li la maron ekvidis, el Vologdo li estis, vologdano. Ne gravas, ankaŭ nun li marvojaĝas... Certe, li ne tre bona maristo estas, iradas kiel logaĵisto, pli alte ne leviĝis. Nemalbona, sed timida...

Silvestro Petroviĉ ridetis, aŭskultis silente. Poste, foliuminte la libron, diris penseme:

— La avoj viaj marvojaĝadis, la patroj marvojaĝadis, vi mem dum la tuta vivo estas en la maro. Vi havas de la avoj kaj

praavoj la grandan libron de marvojaĝoj. Devas vi, fraĉjoj, kolekti kune ĉion, kio estis trairita, desegnita, enskribita de la rusiaj marplugantoj. Ni enskribos ĉion kune en libron, kaj havos ĉion, kio necesas por mara vojaĝado en ĉi akvoj...

— Ĉu vi nin instrui intencas? — demandis avo Teodoro.

— Instrui? — miris Ievlev, penseme nege balancis la kapon. — Ne, avĉjo, ne mi vin instruu. Mi scias malmulte, kaj kion mi scias, tion dume mi ne povas apliki. Kiam mi ekscios pli multe — eble, ĝi taŭgos por vi, sed nun ne mi vin instruu, sed vi min. Ne estas kaj ne povas esti maristo vera sen sperto de ĉio, kion scias vi. Por tio mi lernos de vi vian arton kaj por vi mi eble taŭgos. Ĉu vi prenos min kiel disĉiplon?

— Ĉu kiel ĥaradrion? — larĝe ridetis Rjabov. — Kiel do, avĉjo? Ĉu ni prenos?

— Ni prenu! — bonanime konsentis avo Teodoro. — Sed vi tiam, Silvestro Petroviĉ, ne koleru, kiam iom trafos al vi foje. Ĉe ni estas simple: kiam skualo batos, paroli mankas tempo, en ekscito — frapon al la orelo, kaj al kio ajn, vigligas ni tiel, ke pli lerte laboru...

— Mi ne koleros!

Ili staris iom sur la ferdeko, aŭskultis la maron. Avo Teodoro, edife levinte la kurban fingron, parolis:

— Ne staras ĝi sen ŝanĝo, sed vivas, ne morta ĝi estas, kiel, ekzemple, ŝtono aŭ trabo, sed viva, kiel ni, homoj. Pro tio oni diras, kiel pri homo, — spiras ĝi. Ni — homoj diaj, vivas rapide, hastas, spiras ofte, pro tio mallongas nia vivo. Sed la maro ja estas eterna, kaj spiras ĝi malofte. Jen la brusto mara, proda, kien ajn rigardu la okulo — ĉie estas la maro. Kaj kiam

komencas la brusto de la maro sian enspiron, ni diras — alfluas akvo. Ĉu tiel, Ivano Sabateiĉ?

Rjabov senvorte kapjesis. Lia vizaĝo en la duonmallumo de la blanka nokto ŝajnis malgaja...

— Leviĝas la sino mara, — parolis avo Teodoro, — spiras kaj la riverojn plenigas per siaj spiroj. Kaj pleniginte la riverojn, la maro kvazaŭ ripozas. Tiam ni diras: «Enpensiĝis la Blanka, enpensiĝis, ripozas...» Kaj, ripozinte, tremeros nia maro...

— Tio estas flusoj kaj malflusoj, — diris Ievlev. — Pri tio mi scias. Dufoje dum tagnokto ili okazas, du altaj akvoj kaj du malaltaj, ĉu tiel?.. Nu, iros mi, tempas, Petro Aleksejeviĉ la libron atendas...

Li ekiris al la knaranta ponteto, retroturniĝis, diris:

— Pri multo ni ankoraŭ parolos, sinjoroj maristoj...

— Paroli eblas! — respondis Rjabov. — Kial ne paroli. Maljunulojn en libera tempo necesas kunvenigi, ili multon rakontos: kaj tion rakontos, kiel en glacioj necesas iri, kaj tion, kiaj estas alfluoj kaj defluoj en la gorĝo, kaj pri akvokirloj kun ŝtonoj... Se vere vin logas la maro, sinjoroj ŝipistoj, se veras, ke spiras ĝi al vi, estos al la afero granda utilo de niaj maljunuloj...

Ievlev foriris en la monaĥejon, sur la pobkastelo aperis del Robles, vokis la rusojn ludi kun li ĵetkubojn.

— Mi ja ne iros! — diris Rjabov al Semisadov. — Ludis mi kun li iam, sufiĉas, tro multekosta ludo...

Kaj li eliris sur la bordon — promeni. Avo Teodoro paŝadis apude, ĝemadis, ke doloras la piedoj. Poste kun suspiro

plendis:

— Sed sur la granda tero mi tamen ne povas sidi, Ivaĉjo. Sur la forno kuŝi por mi estus tempo, sed ne: spiras ĝi, la maro, logas...

Ĉapitro naŭa

Eblus ankaŭ kanton kanti, sed se nur ies orelon ne bati.

Proverbo

1. Ĉe skansoj[66] en gardista budo

Majoro James ne plu interesiĝis pri Krikov — li sciis, ke la eksa leŭtenanto ne leviĝos el kaporalo. Kaj kaporalon eĉ ne indas rimarki. Kaporalo pli proksimas al soldato, ol al oficiro...

Sub komando de Atanazio Petroviĉ estis nur tri doganistoj kaj gardista budo ĉe skansoj, sur la Dvina buŝo, — por defendi la urbon kontraŭ neatendita atako de malamikaj militistoj. Neniu en Arĥangelsko timis malamikajn militistojn, sed tia ordo estis establita de malnove: estas skansoj, ĉe la skansoj estas budo, en la budo estas doganistoj, super ili estas kaporalo.

Tempo flugadis nerimarkeble. La gardistoj — ĉiu el ili perlaboradis per sia metio: unu — Sergunkov, kvieta kaj humila ulo, — estis lignaĵisto, liajn faraĵojn prenadis la maljuna patrino, vendadis en la urbo en la bazaro; alia — Aleksio, pli aĝa, — lerte plektadis retojn por fiŝistoj, vendadis, kaj per tio nutradis sian grandegan familion. La tria — Eŭdokimo Prokopjev, Ĥolmogora eburtajlisto kaj granda majstro fari ĉian subtilan laboron, — ne povis eĉ unu minuton sidi sen afero, kaj ĉio, kion li faradis, estis sukcesa: jen li eltranĉas per tranĉilo lignan manĝovazon, admire rigardas ĝin,

66 Skanso — reduto (izolita malgranda fortikaĵo en kamparo, ofte ĉirkaŭ granda fortikaĵo) *(trad.)*.

balancas la kapon, sendas por vendo, kontraŭ la gajnita mono aĉetas multekostan fremdlandan draton, komencas forĝi tiun draton, — li rakontas, ke vidis Solviĉegodan ĉeneton el seruroj, deziras, li diras, provi, eble, sukcesos mem konstrui, por ke estu ne malpli bone. Konstruas li ĉeneton de mirinda beleco, balancas la kapon:

— Oblikve mi konstruis. Al la tero kliniĝas. Ekflugo en ĝi ne estas!

— Kia tia ekflugo al vi bezoniĝis?

— Ja tia, kian la Solviĉegodaj uloj havas. Ĉe ili estas pli bele...

Pri la ĉeneto li forgesas, komencas pripentri fuston por fajroŝtona fusilo, agrafon, argilajn fajfilojn. Ankaŭ tio ne plaĉas, li pensas, pensas — komencas emajli kaj filigrani, kaj poste — reen al la ligno, vidu: eltranĉas salujon-anason.

— Kio, Eŭdokimo Aksenoviĉ, ĉu vi reen iras? — demandas iam Atanazio Petroviĉ.

— Ja, vidu, elpensis mi alian ornamon. Kiam mi ĝin sur la fuston metis, sur la fusilan, tiam mi ĝin elpensis, tamen tie ĝi estis malgranda, sed ĉi tie ĝi estos tute konvena...

Fojfoje ili kantadis triope. La kvara estis gardanta sur la gvatturo — rigardis, ĉu videblas ŝipo. Komencas kantadon, farinte suferantan vizaĝon, Prokopjev, la dua voĉo estas nepre Sergunkov. Sen Sergunkov kanto ne sukcesas. Sur la Dvina vasto, en la rivera buŝo, ekkrias mevoj, fajfas mara vento, libere, larĝe, iam kun minaco, flugas la kanto. Se sur la buŝa malprofundaĵo aperas ŝipo, la gardisto sur la turo batas la frapilon, krias en paroltubon:

— Velon mi vidas, sinjoro kaporalo!

Krikov ekkuras supren — sur la galerion, prenas lornon, fiksrigardas:

— Unu. La flago estas nederlanda — de la Ĝeneralaj Statoj. Iras komerci por profito de sinjoro majoro.

Ili ree kantas kanton, okupiĝante ĉiu per sia afero.

Atanazio Petroviĉ ĉiam pli diligente kaj insiste tajladis eburon. Nun li havis la tutan ilaron, necesan por vera majstro, havis rezervojn de rosmara eburo, havis farbojn — por kolorigi eburon, havis per kio blankigi ĝin. La laboro konsoladis lin, kun ĉizileto kaj alenetoj en la manoj li zumadis kantojn, gajiĝadis, lia rigardo iĝadis pli klara, kvazaŭ forgesiĝadis la peza ofendo.

Rigardante, kiel tajlas kaporalo Krikov, Eŭdokimo Aksenoviĉ suspiradis:

— Dotis vin la Kreinto per talento, sed ne taŭge vi faras, Atanazio Petroviĉ. Diablojn kaj demonojn vi ĝojigas. Malicaj estas viaj figuroj. Vi prefere tajlus ikonon, sur ĝi sanktuloj sur monton facile defilas, sur la monto en la tuta lukso estas Dia brilo...

— Ĉu brilo? — subridas Krikov.

— Brilo, Atanazio Petroviĉ...

— Kial do ĝi por vi tie ekbrilis?

Prokopjev silentas.

— Ja vi mem, Eŭdokimo Aksenoviĉ, tion ne faras, — diras Krikov, — do ankaŭ min ne instruu. Mi, fraĉjo, jam instruita nun estas, vidis mi viajn brilojn...

Tamen foje li decidis tajli sanktulon: tajlis, tajlis, oscedis, oscedis, la sanktulo neniel sukcesadis. Barbeto kvazaŭ de avo Teodoro, nenia bonaspekto, ĉemizo kanabtola...

— Vi lin, Atanazio Petroviĉ, vestus pli dece, — konsilis Prokopjev, — harĉemizon, sur la kapeton monaĥan kapuĉon, estos asketo, fastanto, ermito...

Krikov ekridis, diris gaje:

— Kiel la fabelo diras pri kato Eŭstakio: por iu malfastaĵo, sed por ni bongustaĵo, diris kato Eŭstakio, monaĥiĝinte, kaj asketiĝinte, kaj aldone muson manĝinte...

La sanktulo ne sukcesis. Krikov retajlis lin al fiŝisto, pomora avo. La avo sukcesis, kaj tiel, ke la doganistoj nur lipŝmacadis kaj kapbalancadis. Post la fiŝisto li komencis tajli Dvinan ŝarĝiston. Kiam la afero estis venanta al la fino, venis en la gardistejon gasti Silentulo, Vataĵnikov kaj Eŭtimio Gridnev. El freŝa fiŝo, kiun tage kaptis Eŭdokimo Aksenoviĉ, ili kuiris bonan fiŝsupon, ekiris ronde duonstofo da brando.

Post la fiŝsupo Prokopjev ekkantis:

Aĥ vi malfeliĉo, embaraso,
Sed eĉ malfeliĉo ne malĝojo estas,
Jen per basto malfeliĉo zonis sin,
Kaj per bast' implikis la piedojn...

Flamo de la lignofajro en la griza nokta krepusko strange prilumadis la barbajn vizaĝojn de Silentulo, Vataĵnikov, Gridnev, ĵetadis kurantajn rebrilojn sur kantantan Prokopjev-on, sur enpensiĝintan Sergunkov-on. Kaj tiaj fortaj, tiaj potencaj ŝajnis subite al Atanazio Petroviĉ tiuj homoj, ke li pensis: «Eĉ se militon kune kun ili militi flankon ĉe flanko —

mi ne pereos! Ne, ne pereos!»

Ili kantadis longe, kaj iom poste Eŭtimio rakontis:

— Homoj tiel diras, ke kancelariano Gusev — ne vidu li lumon en la mondo — novan aferon elpensis: preni de fiŝistoj remilan monon ne tiel, kiel antaŭe, sed alie. Kiam fiŝisto el la maro eliros kaj al la bordo aliros, preni de li imposton albordiĝan. Kiam li en la maron iras, tiam li pagu el ĉiu boato debordiĝan aŭ fiŝan monon. Kaj la remila mono kiel estis, tiel plu estos...

Sergunkov oĥis, balancis la kapon.

— Sed ĉu la komunumo permesos?

— Komunumo, ĝi nur laŭ la nomo estas komuna! — disbatante per bastono brulaĵojn en la lignofajro, diris Silentulo. — Komunumo! Tetrajn pariĝejojn dividi kaj herbejojn — tiam ili estas komunaj! Sed kiam oni ilin senhaŭtigi komencos, kiaj ili estas komunaj...

— Nu, nu! — severe diris Prokopjev. — Vi nian Blankmaran landon ne konas bone. Ĉe ni komunumo estas granda afero. Kiam ili unuiĝos — provu, prenu ilin! De antikva tempo ili arbostumpojn elradikigas, el unu bovlo supon manĝas — po kiom da familioj? Tio, frato, ne tiom simplas! La popolo estas lerta, kvankam ne babilas troe...

— Diversaj ĉe vi estas homoj ĉi tie! — diris Eŭtimio.

— Kiaj tiaj diversaj?

— Ja tiaj, ke ĉiaj. Iris ni antaŭ nelonge al foiro haŭli barkojn — ĉiaspecaj homoj estis. El la tuta kristana Rusujo estis popolo. Kaj fuĝuloj ne nur ni estis: multajn liberulojn mi

kalkulis, kiujn malfeliĉo-embaraso al rabado ĵetis. Kaj plej multas fuĝuloj el plugokampoj, de la bojara laboro, neelportebla.

Ili paroladis pri ĉio — pri ekscesaj premoj de impostoj, pri nova konstruado de ŝipoj, pri tio, kiel oni pelos tien homojn el najbaraj vilaĝoj, kaj eble, pelos ankaŭ el malproksime. En la urbo rampis maltrankviligaj onidiroj. Forĝisto ie eksciis, ke oni atendas el trans la maro konstruitan de fremdlandanoj ŝipon, tiaj ŝipoj estos multaj, al matrosoj sur tiuj ŝipoj estos ordonite konvertiĝi al la pagana kredo, preĝi al lignaj idoloj, skrapadi per tranĉiloj siajn muzelojn...

— Mensogas via Forĝisto! — bruske diris Krikov al Silentulo. — Babilas absurdaĵojn, kaj vi malfermis la orelojn...

Prokopjev almetis en la fajron ankoraŭ brullignon, atendis, kiam la branĉetojn kaptos flamo, kaj diris, rigardante al la fajrolangoj:

— Ŝipojn grandajn konstrui — estas bona afero. Kial do koleri? Mi kiom da jaroj pasigis ĉe la skansoj, ĉiam pensadis: kaj niaj maristoj estas kuraĝaj pomoroj, kaj niaj barkoj estas fortikaj, malpezaj por iro, kaj vizitas forajn landojn, sed je ŝipoj ni ne riĉas. Al ni venas sub siaj flagoj kaj bremenanoj, kaj angloj, kaj ankoraŭ diversaj holandanoj, prenas nian varon kiel deziras, sed ni al ili komerci ne iras. Ne, fratoj, ŝipoj estas afero inda. Sed malfacile al ni estos, kiam oni pelos nin en ŝipkonstruejojn, tio estas vero... Sed kial pri tio konjekti kaj diveni...

Kaj li komencis kanton:

Trans monto alta

Ploras knabino,
Ploras belulino,
Rusa kaptitino...

Ili finkantis pri la kaptitino. Krikov ekparolis, pensante:

— Stultaĵojn babilas via Forĝisto, stultaĵojn. Ĉu militaj ŝipoj ne estas bona afero? Se ni havus ĉi tie ŝipojn kaj fregatojn kun kanonoj, kun kolubropafiloj, kun sturmaj brigadoj, ni alie vivus. Negocistoj kaj fremduloj, kiuj kaŝe veturigas varojn, iĝus multe pli kvietaj. Kun urso amiku, sed la hakilon tenu firme, mi konas ilin, diablojn, — iradas, elrigardas, elflaras: kial pagi doganon, se nin eblas preni per nudaj manoj. Vi mem pri la kaptitino kantas, sed vian propran utilon ne vidas...

— Kaj diablo ilin prenu, la ŝipojn! — subridis Silentulo. — Por ni ĉu tiel, ĉu alie — la kapon en la maŝon. Kial pensi pri malpropra...

Li puŝis la flankon de Vataĵnikov, ion flustris al li. Vataĵnikov tiriĝis tiel, ke krakis la artikoj, demandis:

— Ĉu indas?

— Ne gravas, — vigligis lin Eŭtimio Gridnev. — Ili estas propraj knaboj, ili aŭskultu...

Vataĵnikov movis la ŝultrojn, nelaŭte, singarde, kun retrorigardo komencis:

Aj, en urbo ja Kazano
Festis ja kozakoj
Kaj elektis la hetmanon
Razin-on Stefanon[67]...

67 Stefano (Stepan) Razin (1630–1671) — rusa kozako, gvidinta la plej grandan popolan ribelon en 1670–1671 en Rusio.

Krikov levis la kapon, maltrankvile ekrigardis al Silentulo. Tiu estis glatumanta la barbon, liaj okuloj brileradis en la lumo de la lignofajro. Prokopjev estis aŭskultanta, kunpreminte la kapon per la manoj, suspiradis, poste en la mezo mem ekkunkantis. Ekkunkantis ankaŭ Sergunkov. «Ili scias ĝin, — pensis Krikov. — Mirinde — ili scias! Sed ja dum mi estis leŭtenanto, mi ĝin ne aŭdis. Aŭ ne sciis, ke ili scias?»

2. Malfeliĉo post malfeliĉo

Ĉiutage la barka majstro Timoteo Koĉnev intencadis iri kun Ivano Kononoviĉ en Lodjmon — por kuraco kaj ripozo, kaj ĉiutage kun riverenco petadis ankoraŭ iomete plu vivi ĉe avino Eŭdoĥa, atendi kelkajn tagojn, — ja necesas ekscii, kia estis la jaĥto en la fora mara vojaĝo...

— Kvazaŭ vi la sola la ŝipon konstruis, ĉu? — demandadis Ivano Kononoviĉ.

Koĉnev ne respondadis.

Ivano Kononoviĉ legadis dikajn librojn en ledaj bindaĵoj kun artifikaj bukoj, per alta voĉo kantadis psalmojn, nutradis per paneroj birdojn, longe konversaciadis kun Taisja kaj avino Eŭdoĥa. Taisja, aŭskultante la ŝipan majstron, pensadis pri siaj aferoj; ŝiaj longaj, kvazaŭ ĉiam humidaj okulharoj malleviĝadis, la okuloj briletadis. Kaj foje ŝi subite respondis, kaj tiel, ke al Ivano Kononoviĉ ektremis la manoj.

— Timigas vi, timigas per Dio, — diris ŝi, — sed por kio? Jen la suno brilas, Dvino fluas, jen patrino kun infano iras, — kiel bonas ĉio. Sed ĉe vi Dio estas malica, turmentanto, laŭ vi,

lin timi necesas. Por kio tiel, Ivano Kononoviĉ?

Kaj ŝi ridetis.

Duope kun Koĉnev ili atendadis la caran jaĥton: Taisja — la rudriston, la majstro — sian kreaĵon. Li solide rakontadis al Taisja, kiom li konstruis da ŝipoj, kiaj ili estis, kiel li surakvigis la unuan, kiel la duan. Ŝi aŭskultadis silente, rigardante tien, de kie devis aperi la velo de la cara ŝipo...

Dum ili sidis en krepusko, konversaciante per malrapidaj voĉoj, venis Ĥagajo kaj Jegorĉjo kun Ĉernicin — rakonti la novan malfeliĉon: hieraŭ venis la starosto por preni impostojn — la nutran, kaj la malgrandajn poŝtan, kaj la grandan poŝtan, kaj por ekzekutisto, kaj por urba konstruado, — per kio pagi? Kaj hodiaŭ matene veturadis tra Arĥangelsko rajdanto, kriadis al la metiistoj kaj negocistoj novan ordonon: porti la nutran monon al la cara ŝipkonstruejo, kaj kiuj ne portos mem, por tiu la puno estos rapida. La negocistoj ploras, la metiistoj gratas al si la kapojn. Kancelariano Gusev elpensis preni de la fiŝistoj remilan kaj velan monon por ĉiu velo kaj ĉiu remilo, kaj ankoraŭ iajn debordiĝan kaj albordiĝan...

— Por kio ili prenas tiom? — demandis Ĥagajo. — Ili sufokiĝos!

— Sed la ŝipkonstruado? — severe rememorigis Koĉnev. — Jen, alpelis ili virojn al la ŝipkonstruejo — per kio ilin nutri? Kaj por ĉiu laboristo estas unu ŝtelisto, kaj super tiu ŝtelisto estas latrono, kaj super tiu latrono estas bojaro. La afero estas simpla.

— La ŝipoj ja nombras mizere! — diris Ĥagajo.

— Kaj el tiuj eĉ unu estas kontraŭ la mono de Baĵenin, —

rimarkis Ivano Kononoviĉ.

— Sed la ŝipkonstruejo? Kaj la cara palaco? Kaj la kanonaj amuziĝoj?

Ĥagajo koleriĝis, ekscitiĝis:

— La fremdularo tute la urbon malriĉigis, jen al la rajdistoj oni ne pagas dum ioma tempo, al la doganistoj dum pli ol jaro la cara salajro ne iras, la pafistoj entute ploregas, manĝi ja ĉiuj deziras...

Ivano Kononoviĉ kun malica ĝojo promesis:

— Ni ankoraŭ ne tiel ploros, ne tiajn kantojn kantos. Jen, oni rakontas, el Holando nova ŝipo venas je kvardek kanonoj — same pagi necesas. Sur ĝi la matrosoj estas fremdlandaj — ili ne atendos, koleriĝos kaj revenos hejmen...

Ili konversaciadis longe, ĝis la duaj kokokrioj, kaj ĉio rezultadis malbone. Timoteo Koĉnev paroladis malpli ol ĉiuj aliaj, rigardadis al la plafono, pensadis, revadis. Kia estas tiu nova ŝipo el Holando? Kaj kiu ĝin tie konstruis? Estas interese, kiel ili nun la kilon metas? Kaj la kanonojn kiel starigas sur ferdekoj?

3. Sekreta konversacio

En malfrua nokto gastoj frapis en la kondiĉa maniero. Des-Fonteines levis la kapon disde «Kroniko de Eriko», kiun li estis leganta, metis la pipon sur la randon de la tablo, kun tranĉilo en la mano ekiris malrigli. La hundoj estis laŭte bojantaj en la korto. Sur la hela ĉielo rapide kuris ŝiritaj nuboj. Kun bruo malferminte la vazistason en la barilpordo, la kuracisto rekonis Jan-on Urquhart-on kaj hispanon del Robles-on.

La gastoj eniris en la domon silente. Jan Urquhart komencis varmigi la manojn ĉe la kameno, del Robles eksidis en la fotelon. Des-Fonteines metis sur la tablon skatolon kun tabako, botelon kun likvoro. La hispano estis foliumanta la kronikon. Brodita legosigno estis montranta la paĝon, sur kiu haltis la kuracisto: la batalon inter la svedoj kaj la rusoj en antikvaj tempoj sur rivero Nevo.

— Nu? — demandis Des-Fonteines.

La hispano frapfermis la libron.

— Ĉio ĉi ne kostas eĉ rompitan groŝon! — respondis del Robles. — Vi estas en eksceso, *herre* ĉefleŭtenanto. Sed floto estas afero de tre malproksima estonteco. Dume ĉio ĉi ne eliras la limojn de infanaj ludoj. Jes, ili ludas entuziasme, sed tio ĉi estas nur ludo, nenio pli...

Des-Fonteines rigardis al la hispano sen palpebrumi, per akra rigardo. La hispano konfuziĝis pro tiu rigardo. Del Robles kuntiriĝis, ekparolis pli kolere:

— Mi ne devis iri kun ili, jen kio. Niaj mapoj estas senvaloraj. En la komenco mem de la vojaĝo mi ĉesis esti necesa al la moskvianoj. En la Pertominska monaĥejo la caro jam ne rimarkadis min. Kaj la fiŝistoj superŝutis min per mokoj...

— Do, ili mem sukcesis regi sian jaĥton? — demandis la kuracisto per obtuzeta voĉo.

— Jes, *herre*, mem.

— Sekve, ili disponas homojn, sciantajn, kio estas maro?

Urquhart respondis incitite:

— Kaj kio sekvas el tio, *herre* ĉefleŭtenanto? Ili povas havi multajn tiajn homojn, sed ŝipojn por milita floto ili havos ankoraŭ tre ne baldaŭ.

— Ŝipojn konstruas homoj! — diris Des-Fonteines.

— Ili ne havas tiajn homojn.

— Ili havas tiajn homojn, *herre* ŝipestro. Ili havas multe da tiaj homoj.

— Mi ne komprenas la objekton de nia disputo! — ekflamis pro kolero Jan Urquhart. — Ĉiufoje ni parolas pri la samo! Por kio?

— Por tio, *herre* ŝipestro, ke viaj impresoj ne kontraŭu miajn leterojn. Multaj el vizitantoj de Moskvio, reveninte en Svedion, rakontas tion, kion oni deziras aŭdi de ili. En Svedio oni kutimiĝis al venka tintigado de armiloj. La sorto favoris nin. La venko ĉe Breitenfeld levis nin al grado de granda regno. Ni potencas la buŝojn de ĉiuj riveroj en Germanio, la plej granda parto de la bordo de la Balta maro apartenas al la krono. Bremeno kaj Verdeno, la orienta kaj la okcidenta partoj de Pomerio, Bornholmo, Skonelando apartenas al ni. Kompreneble, estas malfacile en tiaj tempoj pensi pri estonteco. Oni ne rajtas prokrasti, *herre* ŝipestro, jen pri kio mi parolas.

— Prokrasti kion? — demandis Urquhart.

— Ekspedicion por gloro de la krono. La urbo Arĥangelsko devas esti forbruligita ĝis la fundo de la fundamento. Ŝipaj majstroj devas esti pendumitaj ĉiuj senescepte, por ke la moskvianoj ne plu pensu pri sia ŝipkonstruado. La eliro en la Blankan maron apartenas al la sveda krono. Mi skribis pri tio

dufoje, kaj mi scias, ke mi havas samopiniantojn tie, en Stokholmo. Ili ne multas, sed ili ekzistas. La estonteco de Svedio dependas de niaj agoj ĉi tie. Ankoraŭ nemulte — kaj estos malfrue. La eliro al la Balta maro estas en niaj manoj, por kio do eksciti ilian imagpovon per la ĉi-tieaj akvoj? Stepoj — jen ilia spaco. Ili rajdu tie sur siaj ĉevaloj kaj pafu per pafarkoj. La maron regas la svedoj kaj neniu alia...

Urquhart aliris la tablon, verŝis por si likvoron, lipis, ŝmacis per la lango: la likvoro estis bona. La hispano sidis en la fotelo, etendinte la krurojn al la fajro, duonferminte la okulojn. Duonon el tio, kion estis diranta Des-Fonteines, li ne komprenis. La alia duono estis klara — veni, rabi, bruligi. Sed tio ne estas tiom facile farebla.

— Kun ĉiu tago, *herre* ĉefleŭtenanto, vi iĝas ĉiam pli rezoluta! — diris Urquhart. — La ekspedicio al Arĥangelsko kaŭzos militon. Milito kontraŭ la moskvianoj estas ne tiom simpla afero, kiel tio povas ŝajni...

— Aŭ nun, aŭ neniam! — rezolute diris Des-Foneines. — Kiu scias, kion alportos al ni la sekva jaro? Mi scias, ke ili mencias Jamon, Koporjon, Oreŝkon, Ivangorodon ankaŭ nun. Ili ne povas kutimiĝi al tio, ke ili ne havas la Baltan maron.

Urquhart subridis:

— Ili kutimiĝos!

Des-Fonteines forturniĝis de Urquhart. Kun li estis sensence paroli. Li estis nenion komprenanta, tiu dika memcerta oficiro, kun plezuro vestinta sin per kostumo de negocisto kaj forgesinta ĉion pro siaj profitoj. Kun malheliĝinta vizaĝo, kunpreminte la maldikan buŝon, Des-Fonteines silentis,

rigardante al la fajro en la kameno. Poste li demandis la hispanon:

— Ĉu la rusa caro montris intereson pri ŝipkonstruejoj en Solovkio?

Del Robles oscedis, respondis kun enuo en la voĉo:

— Tutajn tagojn li pasigadis en la ŝipkonstruejoj.

— Kio ankoraŭ interesis lin?

— Multo, kiom mi povis vidi, sed pleje ŝipkonstruado, *herre* ĉefleŭtenanto.

— Ĉu li ofte paroladis kun fiŝistoj?

— Li pasigadis kun ili tutajn tagojn sur la ferdeko de la jaĥto en la Blanka maro. Ili rakontadis al li kaj al liaj junaj sekvantoj pri tio, kiel endas navigi en la lokaj akvoj, kaj ne nur la lokaj, sed ankaŭ en la oceano. En la monaĥejo sur la Solovkiaj insuloj al li oni alportis antikvan maristan gvidlibron, skribitan sur ligno, sur betula basto...

Des-Fonteines silente rigardis al la hispano.

— Tio estas malbona, tio estas tre malbona! — finfine diris li. — Caro Petro ĉi tie varbas volontulojn por sia estonta floto. Ju pli da lokaj matrosoj estos sur liaj ŝipoj, des pli malbone por ni. Vi devus, *herre* ŝipestro, rekomendi al Apraksin kaj aliaj caraj proksimuloj preni ŝipanojn por estontaj ŝipoj eksterlande. Ju pli da dungitoj, des pli trankvile...

— Sed dungitoj povas iĝi fidelaj al la moskvianoj...

— Ne ofte! — penseme respondis Des-Fonteines. — Ne ofte, *herre* ŝipestro...

Elakompaninte la gastojn, Des-Fonteines longe rigardis al estingiĝanta braĝo en la kameno. Lia vizaĝo esprimadis nenion, krom laco. Poste li malfermis la «Kronikon de Eriko» kaj komencis legi de la mezo:

...Kaj zorgis barkojn kaj rapidajn ŝipojn.
Monsakoj tiam multaj malfermiĝis,
Kaj tiam granda mono disdoniĝis
Al forlasontoj hejmon sian
Sen scii pri reveno sia...

4. Negocistoj rusiaj

La kandeloj estis degelantaj.

Al la tegmento de la palaco sur la Mosea insulo estis tede kaj monotone frapanta pluvo.

Petro sidis sur benko retrokliniĝinte, ferminte la lacajn okulojn, ŝajnis, ke li dormetas, sed kiam Romodanovskij eksilentis, li kriis malpacience:

— Plu parolu!

Teodoro Jurijeviĉ ĉirkaŭrigardis la bojarojn, eksilentintajn sur siaj benkoj, prenis de Vinius stanan kruĉeton, glutis el ĝi. La caro deĵetis la malvastan ŝuon, plendis:

— Sufoke iel. Eĉ pluvas senĉese, sed plu sufoke.

Romodanovskij ree ekparolis. Petro aŭskultadis sufere.

— Incendioj en Moskvo ne ĉesas. Oni ne plu konstruu lignajn domojn. Kiam ni revenos — ni pensos. Ankoraŭ kio?

— La luda militiro, kiu estis kun Gordon destinita al la aŭtuno... Kiel nun? Ĉu ni prepariĝu?

— Apud Kolomenskoje oni preparu... Plu kio?

— Petskribo pri kolonelo Snivin.

Petro silentis. Teodoro Jurijeviĉ ekparolis pri la kolonelo, ke tiu estis rimarkita pri multaj avaraj kaj diomalplaĉaj agoj, koruptiĝas senhonte, al fremdlandanoj ĉion indulgas, rusianoj pro li ne povas eĉ spiri.

La caro oscedis kun spasmo.

— Kiu skribas?

— Negocistoj de la Drapa cento[68] — Serdjukov kun kamaradoj...

— Oni plu skribas kaj skribas! — tirante sin sur la benko, diris Petro Aleksejeviĉ. — Estas ia malsano, je Dio. Fremduloj por ili iĝis osto en la gorĝo. Bone, sufiĉas por hodiaŭ. Ĉu ankaŭ ĉe vi estas plendoj, Andreo Andrejeviĉ?

Vinius klinis la dikan kolon, lia vizaĝo estis senpasia, tute trankvila.

— Ĉu kontraŭ fremduloj?

— Kontraŭ, Siro, tiel!

Petro stamfis per la malvestita piedo, trenante la ŝuon, ekiris al la tablo, sur kiu estis kraketantaj kandeloj.

— Ĉu vi interkonsentis? Unu kaj la samo de la mateno ĝis la nokto!

---

68 «Drapa cento» — unu el la statoj de Rusio ekde la 16-a ĝis la 18-a jarcento, la dua, pli malalta, stato de negocistoj, dum la unua estis la t. n. «Gasta cento», kie «gasto» signifis grandan negociston, komercantan kun eksterlando. Antaŭ la 16-a jarcento ĝi estis la sama stato kun la Gasta cento, t.e. negocistoj. Post la jaro 1720 tiuj du centoj estis reunuigitaj en unu negocistan staton *(trad.)*

Vinius same kriis:

— Ordonu legi, Siro, kaj poste insultu!

Kaj li komencis legi. Nariŝkin, Zotov, Ŝein dormetis sur benko, apenaŭ tenante siajn kapojn. Jakimo Voronin estis rabotanta bastonon per tranĉileto; la tranĉileto estis malakra, Jakimo de tempo al tempo kun grincado akrigadis ĝin sur fera najlo.

— Do ĉesu vi! — subite kriegis la caro.

Voronin timigite kaŝis la tranĉilon, piedpinte eliris for.

Vinius plu legadis. Petro malkontente sulkiĝadis, sed aŭskultis atente. En la petskribo estis menciataj falsa arĝento, ŝtelado fare de fremdlandanoj, akaparado de fokoleo por kvin jaroj anticipe, trompado de doganaj oficistoj, friponado kun perloj, peĉo, kanabaj fibroj kaj multaj aliaj varoj, ekscesoj en la urbo, kiel enloĝiĝas fremduloj kie deziras...

— Eble, ili eĉ ne mensogas? — diris Petro, kvazaŭ pensante.

Vinius faris sur sia vizaĝo nedifinitan mienon: kiu scias, kvazaŭ estis diranta li, estas via volo, Siro, vi pli bone vidas.

La caro senhelpe, infanece ĉirkaŭrigardis.

«En grandan mizeron ni venis, — legis Vinius, — kaj impostojn al vi viajn, cara moŝto, pagi ni neniel povas, niaj hejmoj estas detruitaj, kaj al bonordo venis fino, ĉar tiu angla fremdulo nin regas kaj faras kion deziras, potencas super la animoj kaj la vivoj niaj...»

— Ne, ne mensogas! — rezolute prononcis Petro. — Kiu skribas?

Lia vizaĝo iĝis kolera.

Vinius per firma mano korektis la okulvitrojn sur la dika nazo, serĉis la subskribon.

— Negocisto Litkin kun kamaradoj, Siro.

— Ne mensogas, sed kion fari? — demandis Petro. — Ĉu mi tiujn fremdlandanojn puŝe forpelu? Kie estas via Litkin?

— Dum ni al Solovkio iradis — li ĉiam atendadis. Kaj ne sola li atendis, ili multas ĉi tie. En la picearo ili loĝiĝis, nutraĵon por si kuiradis sur lignofajro, la homoj estas solidaj, evidente, riĉaj...

— Voku!

Romodanovskij kriis en la dismalfermitan pordon:

— Litkin-on tie, negociston, kun kamaradoj voku!

Petro iradis en la manĝohalo de unu rando al la alia, la ŝuo treniĝis post li sur rubando. Sekretario Zotov surgenuiĝis, malnodis la rubandon, gardeme metis la caran ŝuon sur la benkon. Estis aŭdeble, kiel apud la palaco per timigitaj voĉoj intervokadis servistoj:

— Kie estas negocistoj el Vologdo, el Ĥolmogoro, el Arĥangelsko? Vigle serĉu...

En la pordojn blovis humideco, rivera odoro, nebulo...

Da negocistoj estis kvin, ĉiuj elturmentitaj de la atendado, maldikiĝintaj, malpuraj: kiom da noktoj ili dormis en la picearo apud la palaco, timante preterlasi Petron Aleksejeviĉ-on. Al tia vivo oni ne baldaŭ kutimiĝas post plummatracoj kaj zibelaj kovriloj. Ĉiuj kvin riverencis ĝis la tero. Petro silente okulesploris ilin: ili rigardis ne senkuraĝe, koleraj okuloj sur la

ŝvelintaj pro kulpikoj vizaĝoj, koleraj dentoj, — kvazaŭ luparo...

— Nu? — demandis Petro Aleksejeviĉ.

Litkin eliris antaŭen, ekparolis severe:

— Ni pereas, via cara moŝto...

La aliaj balancis la kapojn, jesis, suspiris. Komence estis nekompreneble, pri kio temas, poste Litkin singarde demandis:

— Aŭdis ni, ke ekintencis vi, cara moŝto, konstrui ŝipojn. Ĉu vere?

Petro moviĝis antaŭen, liaj okuloj brileris, ekbrulis.

— Tio estas granda ĝojo, Siro. Permesu al ni mem veturigi varojn trans marojn, ni servos al vi, grandan kapitalon kunmetos — tiam prenu! Prenu, kiom necesas...

— Haltu, haltu! — kriis Petro. — Ripetu, kion vi diris? Do, tio al vi konvenas? Plaĉas?

— Plaĉas! — kune, interrompante unu la alian, ekparolis la negocistoj. — Tiele plaĉas! Preskaŭ senpage nia varo foriras, cara moŝto, utilon ni ne donas, kian ni povas. Vi komprenu...

Ne timante, ili ĉirkaŭis la caron, komencis kalkuli prezojn, montradis per la fingroj centojn da mono, sakojn, barelojn, dekduojn da fokaj ledoj... Petro aŭskultadis, kapjesadis, poste ordonis alporti bieron, plenigis per tabako la pipon. La negocistoj ŝvitiĝis, tian turnon de la afero neniu atendis. Ĉe la tablo, regalante la plendantojn, Petro ordonis al Vinius skribi ukazon pri la unuaj negocistoj-navigistoj, kiuj veturigos siajn varojn trans marojn. Sed kiam Vinius nur malfermis la buŝon, por demandi, kiel limigi en komerco la fremdlandanojn, Petro

ĉitis al li kaj ordonis ne plu paroli pri tio. Li levis la kruĉeton, diris gaje:

— Je la unuaj rusiaj negocistoj-navigistoj, vivu!

Kaj eltrinkis unuglute.

Antaŭ la palaco dise bojis kanonoj, la manĝovazoj sur la tablo tintis. Negocisto Litkin, kvazaŭ kapturniĝinte pro la cara honoro, kriis:

— Ĉu je nia sano oni el la kanonoj pafas? Ja mi, je Dio, ja mi... Ĉion fordonos! Vi min, patro nia, ankoraŭ ne konas! Vi nur proksimigu min!

Oni lin fortiris, li ŝrikis el la angulo:

— La manon kisi! La manon, ho Dio! Ja mi...

En malfrua nokto, post la kokokrioj, venis Jozefo Baĵenin. Per la potencaj manoj forpuŝinte de la pordoj la gardistojn kun halebardoj, li enrompiĝis en la caran ĉambron, depuŝis la festenantajn negocistojn, alsidiĝis al la caro:

— Ĉio ĉi eĉ kvin kopekojn, Siro, ne kostas en la kulmino de foiro. Akceliĝi necesas, sed kio pri homoj, kie ilin preni? Samojedoj ĉi tie estas, nekonvertitaj, se vi ordonos — prenos mi ilin por ŝipa konstruado kaj ĉi tien, sur Solombalon, kaj al mi, en la Rovdinan vilaĝon, kaj al la Vavĉuga rojo, — tiam la afero ekmoviĝos. Kaj ankoraŭ germano Kraft lasu min en paco, ne insultu per sakraj vortoj...

— Nu, prenu, prenu samojedojn! — malpacience diris Petro. — Ankoraŭ kion?

— Al la vojevodo ordonu pri ili! — petis Baĵenin. — Alie vi forveturos, kaj mia afero sen vi haltos...

Petro alvokis Menŝikov-on, ordonis al tiu voki Apraksin-on, Ievlev-on. Kun ili venis Lefort, dormema, rozkolora, afabla, eksidis apude kun la caro, laŭdis pro la bona interkonsento kun la negocistoj, ridetadis al la gastoj, mastrumis ĉe la tablo — galante, ĝentile. Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov kompreneme kapjesadis al la vortoj de Litkin, disputadis kun li en la angulo de la ĉambro. Litkin miradis — li estas juna, sed la kapo estas saĝa.

— Nu, nu, pli rapide diru! — urĝis Petro Jozefon Baĵenin-on.

— Kiel do eĉ pli rapide, Petro Aleksejeviĉ: kanonojn por la ŝipoj mi mem fandos, pulvon mi mem faros — negranda estas ruzaĵo. Mia frato didonita estas instruita pri multaj artoj kaj scioj — li povos. Kablojn ni komencos tordi, velan tolon teksi per maŝinoj...

Petro kunpremis la ŝultron de Baĵenin, skuis:

— Ĉu vi ne mensogas?

Jozefo larĝe krucosignis sin.

— Teodoro Matejeviĉ, Silvestro Petroviĉ, vi estu ĉi tie! — kriis la caro. — Al la Baĵenin-oj fratoj ĉion faru, kiel ili diros! Homojn al ili donu por la ŝipkonstruejoj sen dubo, samojedojn, metiistojn, por ke estu kiu faru la aferon...

— Sed de kie ilin preni? — demandis Apraksin. — Siro Petro Aleksejeviĉ, ja centoj da homoj necesos, eĉ ne centoj — miloj...

Jozefo Baĵenin etendis la kolon al Apraksin, frapis per la pugno la tablon tiel, ke saltis la kandelingoj, kriegis:

— Vi, vojevodo, kie deziras, tie prenu laborajn homojn! Al mi la caro ordonis konstrui! Donu homojn ajne, eĉ nasku! Se ili ne deziros — en ĉenojn, per knutoj pelu al konstruejoj. Vin oni respondecigos, la vojevodon!

Teodoro Matejeviĉ respondis, paliĝante:

— Ne kriu! Alie...

— Kio alie?

Negocisto Nikeŝin tiutempe estis diranta al Petro:

— Sur rivero Kereto, cara moŝto, apud malgranda vilaĝeto Ĉernorecka, sur Kola duoninsulo, glimo abundas. Ili, la fremduloj anglaj, ĝin aĉetas de ni laŭ nekonvena prezo — kiom ili deziras, tiom pagas. Tio estas larmoj, sed ne komerco. Ni konstruos ŝipojn, mem trans la maron la glimon veturigos...

Griza, humida, senventa mateno trovis la gastojn ĉe varma biero — la caro, la negocistoj, Menŝikov, Lefort, disputante inter si, kalkuladis, kion eblas preni en Rusio, por veturigi trans la maron, kiajn de kio necesas atendi profitojn, kie estos komence elspezoj kaj malprofitoj, kian profiton donos al la ŝipoj la komerco...

— Atendu vi! — estis diranta Menŝikov al negocisto Litkin. — Atendu, bona sinjoro! Birdan plumon kial vi ne kalkulas? Malpuriĝi timas? Eraro! Molanasan lanugon fremdlandano per ambaŭ manoj kaptos. Aŭskultu min, ŝtipkapulo. Per peltoj vi nepre komerci devas — per musteloj, linkoj, guloj. Mi vin instruos. Mi iĝos via partnero, instruos, kiel necesas. Por kio komerci per aĉaĵo? Komercu per bona varo...

Jozefo Baĵenin iradis en la manĝohalo, malsprite rigardadis per ebriaj malicaj okuloj, fanfaronadis:

— Hodiaŭ homojn al mi oni alpelos — morgaŭ vi la ŝipkonstruejon ne rekonos! Jene! Kaj la vojevodo ne estas estro por mi, mi mem la vojevodon instruos! Hodiaŭ Baĵenin Joĉjo, sed morgaŭ Jozefo Andrejeviĉ, kaj post ankoraŭ unu tago — grafo aŭ princo Baĵenin! Mi ĉion povas!

Kaj kantadis kun minaco en la voĉo:

Aĥ vi fraĉjoj, miaj fraĉjoj
Aĥ vi bravaj miaj fraĉjoj...

Poste sur ŝalupoj kaj barkoj la tuta kompanio transveturis Dvinon kaj iris rigardi la foiron. Petro forsvingis la sekvantaron, deapartiĝis, kaŝiĝis en malgranda preĝejeto, atendis, kiam kaj la sekvantoj kaj la negocistoj preteriros. Li estis en mallonga jako, kiajn portas fremdlandaj matrosoj, la kolon li ĉirkaŭvolvis per koltuko, sur rimeno ĉe la kokso estis pendanta tranĉilo en ŝagrina ujo. Neniu rekonis en li la caron, nur lia grandega alto altiradis atenton de homoj. La foiro estis en la kulmino mem, fremdlandaj negocistoj malrapide promenadis inter montoj da sunsekigita fiŝo, inter bareloj kun fokoleo, inter korboj kaj bareletoj kun kara kaviaro, apud butikoj, kie sur stangoj estis pendigitaj valoraj peltoj. Sur la vizaĝoj de la fremdlandanoj estis skribita malestimo, ili nenion aĉetadis kaj eĉ prezojn ne demandadis, — simple promenadis sencele, sataj, trankvilaj, silentaj, nescivolaj. Kaj la rusaj negocistoj vokadis ilin, svingadis peltojn, disblovadis mustelan sublanon, montradis, kiom bonspeca estas vakso, kiom firmaj estas kanabfibroj, kiel mirinda estas lino. La fremdlandanoj preteriradis ne turnante la kapojn. Kripla malsaĝulo pro Kristo etendis al ili la brakstumpon, ekbalbutis per la sendenta buŝo. Unu el la anglaj fremduloj batis la mizerulon per la piedo en

altboto. Virino, vendanta pirogojn, kovritajn per tuko, provis ŝoviĝi al la gravaj gastoj — oni regalis ŝin per skurĝo. Lamente ululante, ŝi ekiris for, du pirogoj elfalis el ŝia bastokorbo en la foiran koton, pro timo la vendistino ne levis ilin. Senvortaj, pri nenio parolante inter si, la fremduloj iris inter la vicoj de la komercantoj; ilin akompanis rigardoj, plenaj de malamo.

Petro paŝadis malantaŭe, ne tro proksime, sed tiel, ke li vidis ĉion, vidis ankaŭ la mizerulon, vidis ankaŭ la virinon, perdintan la pirogojn, vidis ankaŭ la rigardojn, per kiuj oni akompanis la fremdulojn, aŭdis ankaŭ la vortojn, kiuj flugis postsekve.

En la fremdula Komerca korto la caro interesiĝis pri prezoj de varoj, per kiuj komercis fremdlandanoj: de Brabanta lazura drapo, de ruĝa kupro en brikoj, de speguloj kaj de grandgrajna pulvo. Ĉio kostis multe, tiom multe, ke Petro kolere kuntiris la brovojn. Rezultis, ke kontraŭ kvardek zibeloj eblis aĉeti malgrandan brikon da kupro, volvaĵon da fadeno kaj kruĉon da olivoleo...

En densa homamaso, ĉirkaŭinta foiran histrionon, la caro staris iom, rigardis: la histriono estis ridinde montranta, kiel fremdulo aĉetas ŝaffelon de rusa negocisto. La urbanoj ridadis, turnadis la kapojn, la histriono plore lamentadis...

Petro ridetis, deiris kaj tuj renkontis Patrikon Gordon-on, — tiu estis serĉanta bonan pipan tabakon.

— Ha, Peter! — diris Gordon. — Por kio vi ĉi tie tiel frue iras?

— Kaj vi por kio? — demandis Petro.

— Mi havas aferon.

— Nu, kaj mi havas aferon.

Ili ekiris pluen flanko ĉe flanko. Gordon ekvidis tabakon, komencis marĉandi. La fremdulo estis malvarme ridetanta kaj ne cedanta. Petro pensis pri io, kuntirinte la brovojn, rigardante super la kapoj de la foiraj homoj. Gordon finfine interkonsentis pri prezo.

— Ĉu bonan tabakon vi aĉetis? — demandis Petro.

— La tabako estas bona, sed tro kara! — diris Gordon. — Tre, tro, ege kara...

— Kiom vi pagis?

Gordon diris la prezon. Petro Aleksejeviĉ sakris, ekparolis laŭte:

— Tio estas friponaĵo, sed ne komerco! Tranĉiloj, ĉu vi scias, kiom kostas? Kupro, damasko, ladano, mi mem demandis! Ili siajn prezojn fiksis, insistas pri ili akorde, kune. Iras ili tra la bazaro, kiel idoloj, ĉion scias antaŭe, sed niaj — barbaj, grizharaj, — post ili per saltetoj. Be!

Patriko silentis, eligante fumon el la pipo, iris malrapide, rigardis malgaje. Petro plendadis, rigardadis al Gordon de sur sia grandega alto, tiradis lian manon:

— Pro siaj klopodoj la fremdlandanoj prenas tiom multe, ke estas mirinde. Kaj ni estas en iliaj manoj, ĉu vi aŭdas, Patriko, jen kiele en la manoj. Ili sur siaj ŝipoj al ni venas, sed ni ŝipojn ne havas, ili estas mastroj super ni...

— Jes, ili estas mastroj, Peter! — diris Gordon. — Kian prezon ili fiksas, tian prezon vi havas, jes, Peter. Ili malriĉigas vin kaj riĉiĝas mem...

— Bone, bone! — kun minaco diris Petro. — Dume ni toleras... estas iuj — supozas, ke ni eĉ ne vidas, sed vane: ni vidas. Ni vidas, sed kion fari? Por dekduo da malicaj fremdlandanoj eble unu kun saĝo troviĝos, lertulo, faristo. De li estas utilo nemalgranda... Ni atendu, Patriko...

Gordon interrompis:

— Atendi — ne! Ne eblas plu atendi, Peter. Vi konstruas ŝipojn, necesas konstrui nepre, brave! Necesas konstrui multe da ŝipoj. Tiam profito estos al vi, — jen kiel, Peter... Mi ankoraŭ parolos, aŭskultu min...

Gordon iĝis parolema; konversaciante, interrompante unu la alian, ili eliris sur la bordon de Dvino, eksidis sur trabon. Petro Aleksejeviĉ, subridinte, petis tabakon por plenigi la pipon.

— Vi estas generalo, Patriko, — diris li al Gordon, — dum mi ĝis generalo devas ankoraŭ longe servi. Regalu min per via generala tabako...

Gordon regalis, Petro ekbruligis sian pipon, demandis kvazaŭ senintence:

— Antaŭnelonge, Patriko, kiam estis ni en la Pertominska monaĥejo, rakontis vi al ni ĉiuj, ke kvazaŭ estas tiaj folioj, nomataj gazeto. Kvazaŭ oni ofte, eble eĉ foje dum semajno ĉi gazetojn presas, kaj multon utilan en ili legi eblas...

Sidante sur la trabo ĉe la Dvina akvo mem, ili longe konversaciis pri gazetoj, pri prezoj, pri komerco, pri ŝipoj kaj pri transmaraj landoj. Petro rigardis al la griza Dvino, al Gordon iam ŝajnis, ke li eĉ ne aŭskultas. Sed Petro Aleksejeviĉ aŭskultis atente kaj pensadis siajn pensojn...

Poste, kiam ili leviĝis, por iri al la ŝipo, la caro subite diris:

— Homoj necesas, Patriko, multe sciantaj, kleraj, bonvolaj al ni. Sed kie ilin preni tuj?

Li premis la kubuton de Gordon, aldonis, sulkiĝinte, kun malsimpatio:

— Via ja kolonelo Snivin en Arĥangelsko kion faras? Ĉu? Vi avertu lin. Vin kompatante, mi dume toleras. Sed alie... ĉu vi aŭdas, Patriko?

Gordon riverencis, respondis per la solaj lipoj:

— Mi aŭdas, Peter. Mi lin avertos. Sed, Siro, tio ĉi estos vana. Tiaj homoj, kiel kolonelo Snivin, devas esti pendumitaj por edifo de iuj en Kukujo. Granda fosto kaj transversa trabo...

— Ĉu vi freneziĝis? — demandis la caro.

— Mi — ne! Mi ne havas deziron, ke vi min kompatu, Peter. Jen kiel...

5. Estas malfacile vivi por homo!

Antaŭ la Elia tago[69] iĝis certe sciate, ke al la Dvina buŝo finfine venis la longe atendata Jan Flam sur sia ŝipo. Rjabov interkonsentis kun avo Ignato por morgaŭ kontraŭ kvar duonkopekoj, kaj nehaste, en matena malvarmeto, Ivano Kononoviĉ, Timoteo, Taisja kaj la rudristo ekiris sur Dvino al Solombalo — renkonti la ekzotan ŝipon. Taisja ĝoje ridetadis renkonten al varmegaj sunaj radioj, ridinde sulkadis la nazon, kantadis mallaŭte siajn ĉarmajn kantetojn, la viroj solide konversaciis pri la fregato: kiaj sur ĝi estas kanonoj kaj ĉu estas vero, ke da ili estas kvardek kvar, kia estas la rigilaro, kiel

69 La 20-an de julio laŭ la Julia kalendaro *(trad.)*.

servos ĉi tie holandaj matrosoj...

— Tio estas la tria ŝipo, — rimarkis Ivano Kononoviĉ. — Rapide fariĝis: ne estis eĉ unu, sed nun estas tri...

— Kial rapide, — respondis Timoteo, fiksrigardante foren — tien, de kie devis aperi la fregato, — ĉu tio estas rapide?

Rjabov, kombante sian orkoloran barbon, retenante sub la Dvina vento siajn buklajn harojn, rakontis, kiel li aŭdis konversacion de caro Petro kun proksimaj bojaroj, kiam oni festenis okaze de la saviĝo en la Una golfo, apud la Pertominska monaĥejo. La caro tiam certe diris: estu en Rusio floto, kaj la komencon de tiu floto oni konstruu en la Arĥangelska ŝipkonstruejo.

— Ĉu vi tion mem per viaj propraj oreloj aŭdis? — laŭte demandis Timoteo.

— Mem.

— Ĉu vi veron diras?

— Mensogi mi ne estis instruita.

Timoteo moviĝis sur la benko, iom palpebrumis, ĉirkaŭlekis la lipojn. Sur lia vizaĝo aperis feliĉa, knabeca esprimo.

— Jen, ekĝojis! — moke diris Ivano Kononoviĉ. — Ne vi konstruos, certe! Oni sendos Nikols-on kaj Jan-on, kaj al vi — hakilon en la manojn, haku kaj dentofrapojn ricevadu de ili pro instruado...

La lumo, aperinta en la okuloj de Timoteo Koĉnev, estingiĝis, li ektusis, kraĉis, forturniĝis. Taisja alpremiĝis per la ŝultro al la ŝultro de la edzo, demandis flustre:

— Kial li tiel kun li?

— Malmolkoriĝis la homo! — mallaŭte respondis la rudristo. — Ĉu vi pensas, ke al li estas facile? La ŝipon li konstruis, sed rigardas al ĝi de malproksime, kaŝe, kiel ŝtelisto.

Rjabov silentis iom, ekrigardis foren, en nebulon, el kie aperis subite nigra skulptita muzelo de la figuro, ornamanta la nazon de «Sankta profetaĵo» — la nova fregato, venanta el Nederlando. En la sama tempo la ŝipon oni ekvidis sur la Solombalaj insuloj — sur la Bana, la Nikolaa kaj la Granda. El la ŝipkonstruejo kun sonoro batis kanonoj. Baĵenin-oj ekkuris kun meĉobastonoj sur la ferdeko de sia jaĥto — por saluti la novan ŝipon; ekkuris kanonistoj ankaŭ sur la ferdekoj de la nova «Apostolo Paŭlo». Eksterlandaj komercaj ŝipoj kaj eskortantoj, kvazaŭ ektiminte, ke iom malfruiĝis, pafis per flankaj baterioj, mortiroj, pruaj kanonoj. En la travidebla aŭtuna mateno super Dvino jen tie, jen ĉi tie deŝiriĝadis de la ŝipoj blankaj vataj fumetoj, resone ruliĝadis pafoj, kaj de la Kega insulo arĝente sonis novaj sonoriloj de profeto Elio. Iom poste batis la granda sonorilo de la Barbara preĝejo, poste intermite, kvazaŭ por Pasko, gaje eksonoris oni en la monaĥejo kaj en la preĝejo de sankta Nikolao.

«Sankta profetaĵo», la fregato kun helflavaj lakitaj pobkasteloj, kun levita supren pobferdeko, kun galerio, ornamita per skulptitaj figuroj de maraj monstroj, kun glimaj lanternoj super la pobo, estis malrapide, peze turniĝanta sur Dvino, por ekstari ĉe ambaŭ ankroj antaŭ la Mosea insulo, de kiu same estis pafantaj la caraj kanonoj.

— Granda! — diris Koĉnev.

— La vangoj estas kiom grandegaj! — rimarkis Ivano Kononoviĉ.

— La diojn ja necesis sur io apogi — jen la vangoj.

— Da dioj ili multe enŝovis! — balancis la kapon Rjabov.

— Kun tiaj dioj droni estas facile, — subridis la maljuna ŝipmajstro. — Kion ili pensis!

— Kaj la veloj estas kiaj dikventraj! — lispe diris avo Ignato. — Vidu, kiel pufiĝis...

— Kiom oni pagis kontraŭ ĝi, ĉu vi ne scias? — demandis Timoteo de Rjabov.

— Dek unu mil talerojn, kvazaŭe, — respondis Rjabov.

Koĉnev fajfis, Ivano Kononoviĉ ekridis en la barbon.

— Tio en rubloj kiom estas? Ĉu mil ducent? — li puŝis Timoteon per la pugno al la flanko, laŭte ekridegis. — Ĉu, Timĉjo? Ja mia «Paŭlo» apenaŭ kvarcent kostis kun la tuta ekipaĵo. Sed estas pli bona...

— Sur la via estas malmulte da dioj! — respondis Timoteo. — La via nur unu muzelon entute havas, ĉu tio estas ŝipo...

— Sufiĉas mueli per la langoj! — same subridante, diris Rjabov. — Jen troviĝis saĝuloj!

Sur la bordo tiutempe batadis timbaloj, ludis klarionoj — bojaroj kaj princoj kun honoro kaj respekto estis renkontantaj la fremdlandajn maristojn. El la boato de Ignato videblis: caraj sekvantoj estis rulantaj al la bordo barelojn — por regalo; kuiristoj estis trenantaj stanajn kaj kuprajn pladojn kun antaŭmanĝaĵoj, kelkaj gigoj estis navedantaj inter la albordiĝejo kaj la ankriĝinta fregato. Ĉiun matroson, elirantan sur la bordon, la caro brakumadis kaj rapide kisadis, kaj kiam el la gigo leviĝis laŭ la ponteto ŝipestro Jan Flam — la caro,

ridetante, longe tenis lin je la kubutoj, rigardis en lian vizaĝon, poste alpremis al si — unu fojon, ankoraŭ fojon kaj ankoraŭ.

— Jene! — diris Rjabov. — Ĉu vi vidis, uloj?

— Pro kio tiele? — ree demandis Taisja.

— Pro kio, pro kio! — forsvingis Rjabov. — Tia kutimo estas sur nia patrino-tero...

Li suspiris, ridetis kaj ordonis:

— Ni lunĉu, kaj la fremdlandaj matrosoj nin enviu...

Ili ekstaris ĉe la bordo, dismetis flanojn, frititan hipoglosaĵon, cepojn. Avo Ignato per siaj malpezaj piedoj, vestitaj en ledajn botojn, kuris en drinkejon, kie apud la pordo kun ŝafa kranio jam estis interbatiĝantaj holandanoj, aĉetis duonstofon, revenis, rakontis:

— Hodiaŭ en la urbo montros sin sinjoroj fremdlandaj marvojaĝantoj. Ĵus sur la dian firmaĵon ili paŝis — kaj jam en sango...

Rjabov disverŝis la vodkon en la kruĉetojn, enpensiĝis, poste nelaŭte eldiris:

— Sed tamen... tri ŝipoj. Kaj ĉiuj kun kanonoj...

— Por vi ja ĉu grandas profito! — dolĉe rigardante al la vodko, respondis Ignato. — Ne vi la varojn trans la maron veturigos...

Proksime haltis boateto. El ĝi elsaltis Krikov, tute maldika, kun grize pala vizaĝo. Li aliris, alsidiĝis en la ŝalupo sur la benkon, lipis la vodkon, almanĝis per flano.

— Kion oni diras en la dia mondo? — demandis Rjabov.

— Novaĵoj estas bonaj, — respondis Krikov, — neniu tiun aferon venki povas, tial oni al miaj doganaj soldatoj komisiis: tributojn ni nun de via frataro prenados. Remilajn kaj velajn, ĉu vi ne aŭdis? Kaj se iu ne pagos ĝis la tamburado — iros al la cara ŝipkonstruejo, kalkulo — ses duonkopekojn por tago...

— Kaj se mi, ekzemple, havas nek remilon, nek velon? — demandis Rjabov.

— La monaĥeja ŝalupo dronigita estas sur vi, — respondis Krikov, — la afero estas simpla.

— Ĉu freneziĝis ili?

Krikov subridis, kvazaŭ dentomontris, ekrigardis malgaje en la kruĉeton, kie la suno estis brilanta en la malklare flava drinkeja brandaĉo, sulkiĝis kaj eltrinkis.

— Tio estas ankoraŭ nur floroj! — morne diris Ivano Kononoviĉ. — Atendu la berojn...

Almanĝinte ankoraŭ, ili iom aŭskultis muzikon sur la nova ŝipo kaj, dispuŝante per la nazo de la ŝalupo aliajn barkojn kaj boatojn de scivolemaj arĥangelskanoj, direktis sin hejmen.

Hejme avino Eŭdoĥa estis bakanta kukojn, fritanta bovaĵon, pistanta ajlon por saŭco. Reĝustigante la kaptukon, ŝi diris:

— Kaj kio tia okazas? Antaŭe, kiam mi juna estis, kion mi manĝas — tio taŭgas. Sed nun — jen pirogon mi deziras, jen viandon, jen nudelkukon kun kokaĵo. Ho, tempas al miaj ostoj iri en sian lokon...

Rjabov subridis al la maljunulinaj etaj ruzaĵoj: kiam li revenis el la maro, ekde tiam ŝi regalas lin kun la juna edzino — pli dolĉe, pli grase. Scias ŝi, ke malriĉas la fiŝisto, kiel muso

preĝeja, kaj tial ŝi ŝajnigas, kvazaŭ ŝi por si mem penas.

Ili eksidis al la tablo kun pura tablotuko, Krikov demandis:

— Rudristo, kiel vi vivos?

Rjabov ludis iom per la kulero, surmetis ĝin, glatumis per la polmo kaj same demandis:

— Pri kio vi diras, Atanazio Petroviĉ?

— Pri tio — kion vi manĝos, — klarigis Krikov. — La caro al Moskvo iros, al monaĥejaj laboruloj por vi la vojo por ĉiam estas fermita. Ĉu kiel piloto vi multe perlaboros? Kaj nun estas aŭtuno, poste vintro nia malvarma, tegmenton super la kapo vi ne havas, fiŝon vi ne kaptadis, bestojn ne ĉasadis, la juna edzino, mi pensas, por malvarmo eĉ vestaĵojn ne havas...

Taisja rozkoloriĝis, mallevis la okulojn.

— Tro multe da zorgo! — diris avino Eŭdoĥa, surmetante sur la tablon brasiksupon. — Jen la tegmento, kaj jen la forno...

— Atendu, avinjo! — interrompis Krikov. — Mi ne por deco parolas, mi pri la afero diras... Ankaŭ vi sidiĝu kaj aŭskultu...

La avino eksidis, faris severan vizaĝon: al viroj oni ne kontraŭdiras, kaj se viro ordonas aŭskulti — tio signifas, ke li estimas, konsilon atendas.

— Pri mia eburskulpta scipovo vi scias, — diris Krikov, — mi en tiu arto inter nia pomora popolo estas ne la unua, sed ankaŭ ne la lasta. Kaj se tiel, tiam eltranĉi por vi tabulojn mi opinias bagatelo...

— Patro nia! — kunfrapis la manojn la avino. — Kara...

— Atendu! — koleriĝis Krikov. — Permesu diri, avinjo. En la junaj jaroj, antaŭ ol viaj okuloj malfortiĝis, estis vi ornamistino — kaj por tablotukoj, kaj por pantalonoj, kaj por sarafanoj, — la unua en niaj lokoj. Ĉu mi veron diras?

Rjabov konfirmis — veron. Li eĉ nun memoris la avinjajn tolojn kun mirindegaj ornamoj — en veloj, ŝipoj, fiŝoj, birdoj, herboj...

— Farbon vi scipovas prepari, — daŭrigis Atanazio Petroviĉ, — viajn sekretojn antikvajn vi same, mi pensas, ne forgesis. Tabulojn mi por vi kaj Taisja eltranĉos novmanierajn, por ke pro viaj toloj en la Komerca korto oni interbatiĝu...

— Mi ankaŭ orbrodi povas, — mallaŭte diris Taisja, — zonojn mi scipovas fari, tiajn, kiajn oni ĉe Peĉoro, kaj ĉe Pinego, kaj ĉe Onego plektas...

Ili manĝis, Krikov leviĝis — adiaŭi. Avino Eŭdoĥa subite alpremiĝis al lia brusto, ekploris. Al Taisja ektremis la rozkoloraj, ĉiam mokemaj lipoj, la rudristo grakis, ekrigardis en la angulon, al la avinaj kuracaj herboj...

— De kie vi aperis tia homo? — demandis Taisja. — Kial vi estas tia, Atanazio Petroviĉ?

Krikov ne respondis, tusis, kvazaŭ misglutis sbitenon[70]. Rjabov eliris kun li sur la peronon, ili ambaŭ eksidis, komencis grati la unuokulan hundon, kiu nutriĝis ĉe avino Eŭdoĥa. La hundo metadis la muzelon jen al la genuo de Rjabov, jen, timante ofendi Atanazion Petroviĉ-on, ŝoviĝadis al li.

— Jen kiele, Ivano Sabateiĉ! — diris penseme Krikov.

— Jen tiele...

70 Antikva rusa trinkaĵo, kuirita el mielo, spicoj kaj herboj *(trad.)*.

Ili silentis iom.

La hundo lerte kaptis muŝon, klakinte per la dentoj. Trans la domo longe muĝadis bovinoj, fremda bovino enrigardis en la korton, ektimis, desaltis. Ie en la urbo ekkantis rajdista trumpeto.

— Estas malfacile vivi por homo! — eldiris Krikov.

Rjabov ekrigardis al Atanazio Petroviĉ, al lia sunbruna malfermita vizaĝo, rimarkis faltojn, kiuj antaŭe ne estis, malgajan sulkon ĉe la buŝo kaj konsentis:

— Ne facile!

6. Severa parolo

Nelonge antaŭ la fornavigo al Moskvo, kiam la cara ŝiptrajno jam estis ŝarĝata sur Dvino, Patriko Gordon ankoraŭ foje vizitis kolonelon Snivin-on. Dum la tuta tago la generalo malbonfartis, sed vespere li leviĝis de la benko, sur kiu li kuŝis, surmetis mantelon, prenis bastonon kaj, kuntirinte la brovojn, ekiris al la domo de la kolonelo. La nepoj, la filino kaj kolonelo Snivin mem sidis ĉirkaŭ la tablo, primetita per bombonoj kaj biskvitoj. Kraketadis kandeloj, la manĝilaron ornamis granda bukedo de modesta eriko, kiu devis rememorigi pri erikejoj de la kara Skotlando. La buklitaj krispaj nepoj rigardis al la avo per klaraj okuletoj, duvoĉe kantis al li kortuŝajn skotajn kantojn. En la kameno, pro humida vespero, estis krake brulantaj peĉaj pinaj ŝtipoj. Kafisto el rajdistoj surtabligadis fortan aroman kafon kun figoj.

Gordon sidis inter la nepoj, kontraŭ la filino. Anabela

suspiradis, viŝante la humidajn okulojn per punta tuketo. La vizaĝo de la generalo estis malafabla, la vilaj brovoj malalte pendis super la severaj okuloj...

La kafisto per la mano en ganto ankoraŭ verŝis kafon. Snivin sendis lin for. Patriko Gordon ordonis al la infanoj ludi en la apuda ĉambro. Anabela, leginta pro enuo multajn kavalirajn romanojn, enmetis la manon de la patro en la etenditan polmon de la kolonelo. Sed apenaŭ ŝi eliris, Gordon elŝiris sian manon kaj ekparolis akre:

— Kolonelo Snivin, mi venis al vi por averti vin de la nomo de la Siro!

Snivin ekstaris, liaj brilantaj vangoj blankiĝis.

— Kolonelo Snivin, — daŭrigis Gordon, — caro Petro ne plu estas knabo, kiun vi ĉiuj ĉarmadis per mensogoj kaj banalaj fajrartaĵoj en Kukujo. Caro Petro estas matura viro. Dufoje ĉi tie, en Arĥangelsko, vi aranĝis tagmanĝojn honore al li, kaj nun vi trompas vin per espero, ke li ne estas informita pri la fiaĵoj, kiujn vi faras. Li estas informita pri multo, kolonelo Snivin! Li havas fidelajn kunulojn, kiuj, eĉ riskante altiri al si lian koleron, diras al li la veron. Viaj fiagoj...

— Sinjoro generalo! — ekkriis Snivin.

— Ĉu vi estas ofendita? — kun malamo demandis Gordon. — Ĉu vi deziras satisfakcion? Ĉu vi intencas proponi al mi duelon? Mi estos feliĉa mortpiki vin, ĉar mortigi vin — signifas savi la honestan nomon de Patriko Gordon...

Snivin paŝis antaŭen, faligis seĝon, alpremante la manojn al la koro, ekparolis:

— Ho sinjoro! Ĉu vi vere ne scias, ke la dogana leŭtenanto,

pro kiu vi imputas al mi tiom multajn malnoblajn agojn, estas konviktita pri krimoj sendubaj? Tiu ĉi senindulo kaj latrono, koruptulo kaj arogantulo...

La generalo demandis kun subrido:

— Ĉu vi estas tute certa pri tio?

— Mi estas certa pri tio same, kiel pri tio, ke li el leŭtenanto iĝis kaporalo.

— Sed ne por longe, kolonelo! — firme diris Gordon. — Mi uzos ĉiujn miajn fortojn por tio, ke la malfeliĉulo revenu al la posteno, kiun li okupis antaŭe. Mi ankoraŭ havas sufiĉe da pacienco, vi scias tiun trajton de mia karaktero. Kaj la caro, dankon al la Kreinto, al mi ankoraŭ iam kredas...

Li ordonis al servisto doni la mantelon.

Eniris Anabela kun la nepoj, la nepoj etendis al la avo la manojn, kiel instruis la knabojn la patrino. La avo rigardis al la infanoj desupre malsupren — nealirebla, fremda.

— Patro! — ekkriis Anabela.

Kolonelo Snivin estis amare suspiranta: li ne povis rigardi trankvile, kiel severas la avo kun siaj nepoj. Anabela, tordante al si la brakojn, ploris per pezaj larmoj. Al la nepoj tordiĝis flanken la buŝetoj, ili ambaŭ ekploris. Tio estis neŝajniga malĝojo, la nepoj amis sian severan avon. Per fortikaj manoj la generalo prenis la pli aĝan knabon, levis lin alte, diris flustre:

— Adiaŭ, infano!

Li prenis la malpli aĝan, kisis al la pufa varma vango, alpremis al sia larĝa brusto.

— Adiaŭ ankaŭ vi, mia infano, adiaŭ por ĉiam!

Nek al la filino, nek al la kolonelo li riverencis.

Paŝante sur la kurba strateto, Patriko Gordon ree ekfartis tute malbone: kunpremiĝis la koro, li ne povis spiri. Faliginte la bastonon, la generalo kaptis per la manoj palisojn de barilo kaj tuj komprenis, ke li derampas sur la teron. «Nun mi ĉi tie iomete ripozos!» — pensis Gordon, sed la tero komencis ien enfali, kaj li ĉesis kaj vidi, kaj aŭdi, kaj pensi.

Rekonsciiĝis la generalo en la hejmo de kolonelo Snivin. Kuracisto en tute nigra vesto, kun malhela vizaĝo kaj maldikaj lipoj, estis kirlanta en glaso orkoloran trinkaĵon. Anabela nemalproksime estis flustre interparolanta kun la edzo. La vizaĝo de Snivin estis memkontenta kaj trankvila.

«Li min entombigis! — pensis Gordon. — Sed, diablo prenu, mi ankoraŭ ne mortis. Certe, mi estis tie, sed mi revenis el tie tien ĉi. Mi eĉ estis tie dum granda tempo, sed nun mi estas ĉi tie. Kia malfeliĉo por vi, sinjoro, ĉu vere?»

La koro batis egalmezure, trankvile. Suna radio — malgranda kaj gaja — lumis sur la litkovrilo, evidente, estis mateno. La kuracisto kun la trinkaĵo en la glaso aliris proksime. Lia rigardo renkontis la rigardon de Gordon.

— Ho, ĉu vi fartas pli bone? — demandis la kuracisto streĉite.

— Jes, mi fartas pli bone! — respondis Patriko Gordon kaj mem miris pri forto kaj laŭto de sia voĉo. — Verŝajne, mi fartas tute bone. Mi simple laciĝis, malmulte dormis, multe manĝis kaj drinkis. En mia aĝo la plej bona kuraco estas abstinado. Mi dankas vin, sinjoro doktoro, mi ne uzas kuracilojn...

Per trankvila movo li deŝovis de si la manon de la kuracisto, eksidis sur la lito, diris kun suspiro:

— Mi tre bedaŭras, ke mi ĉagrenis mian filinon kaj ŝian edzon — sinjoron kolonelon. Mi treege bedaŭras. Sed nun mi fartas tute bone... Mi estas sana!

Restinte sola kun la kuracisto, la generalo demandis:

— Kia estas via nomo, sinjoro?

— Mia nomo estas Des-Fonteines.

Gordon kapjesis kaj ekparolis penseme:

— Ĉio estas sufiĉe simpla, sinjoro doktoro, sufiĉe simpla, se pensi kiel indas. Kiam ni servas al la rusoj honeste, tiam nin malamas niaj samlandanoj, ĉu vere? Kaj sugestas al la rusoj pri ni ĉiajn fiaĵojn. Kaj la rusoj, probable, pravas, kiam ne tute fidas nin. Pro kiu kaŭzo ili devas fidi nin?

Des-Fonteines malvarme ridetis.

— Generalo estas absorbita de tiu ĉi popolo! — diris li. — Iam tiel okazas...

— Tio okazas kun ĉiuj, kiuj vivas ĉi tie longe, — respondis Gordon. — Kiu havas orelojn por aŭdi kaj okulojn por vidi, kaj kiu, certe, estas ne tute stulta...

— Ĉu tiele?

— Mi permesas al mi aserti, sinjoro, ke ĝuste tiel.

— Sed mi pensas alie, generalo. Kvankam mi pasigis ĉi tie ne multe da tempo, sed mi supozas, ke la moskvianoj ne meritas estimon...

— Kial do?

— Tial, ke ĉi tie okazas senekzemplaj kruelaĵoj...

— Ĉu senekzemplaj en la civilizita mondo?

— Almenaŭ en la civilizita mondo.

Gordon pli oportune etendis la longajn krurojn, reĝustigis la kusenon sub la dorso, ekparolis obtuze, amare:

— Estu trifoje damnita la mondo kaj la stultuloj, loĝantaj en ĝi. Koperniko dum tridek kvin jaroj prokrastadis presadon de sia libro, timante tiun vian civilizitan mondon, kaj ekvidis sian verkon, eldonitan de tipografo, nur sur la mortolito. Kaj li pravis en sia timo, Koperniko. La inkvizicio kondamnis lian verkon, kiel herezan. Mi mem legis en la «Indekso de la Kongregacio», ke la libro de Koperniko estas malpermesita, ĉar kontraŭdiras al la Sankta Skribo. Kaj Galileo? Vi estas kuracisto, sinjoro, kaj devas koni tiujn glorajn nomojn! Diablo prenu, en via Eŭropo Galileon oni devigis rezigni pri si mem...

Des-Fonteines rigardis al Gordon ne deŝirante la okulojn; videblis, ke li aŭskultas kun intereso.

— Kaj kiam Galileo mortis, tiam oni rifuzis al li enterigon en tombejo. Ĉu vi estis informita pri tio? Kaj pri Giordano Bruno vi same estas informita? Cetere, sinjoro, ĉu vi neniam vidis la plumban prizonon Piombi en Venecio? Ne? Kaj mi havis honoron vidi ĝin. Dum ses jaroj Brunon oni tenis en tiu prizono, kaj iom poste forbruligis lin viva en Romo...

Sur la vangoj de Gordon aperis makuloj, la okuloj severe brilis el sub la superpendantaj brovoj, la voĉo sonis potence.

— Li estis punita tiom mizerikorde, kiom eblis, kaj sen verŝo de sango, — kun kolera moko ripetis Gordon la formulon de la mortkondamno de la sankta inkvizicio: «Sen verŝo de

sango»...

— Tio estis antaŭ preskaŭ cent jaroj, — interrompis Des-Fonteines. — La moroj ekde tiam ŝanĝiĝis...

— La moroj neniom ŝanĝiĝis! Ĉu statuo de Bruno — tiu grandulo el granduloj — estas metita sub la kupolo de la katedralo de Sankta Petro en Romo? Kial vi silentas? Ĉu la inkvizicio kondamnis sin mem? Ne, sinjoro, neniam — ĉu vi aŭdas? — neniam oni metos Giordano-n en la katedralo! Kaj tiuj damnitaj barbaroj aŭdacas kondamni la moskvianojn, ridi pri ili kaj mallaŭdi tion malbonan, kion ili vidas ĉi tie, tiel, kvazaŭ ili mem estas anĝeloj, flugintaj el la ĉielo. Aŭskultu min atente, sinjoro: kiam mi en la junaj jaroj estadis en la Varmia episkopujo, tie dum kvin jaroj oni bruligis sescent sorĉistinojn, kaj inter ili estis bruligitaj dudek tri knabinoj, la plej aĝa el kiuj eĉ ne aĝis dek jarojn. En la princlando Reŭsa dum du jaroj estis forbruligitaj pli ol mil sorĉistinoj. En la tuta via civilizita mondo ĉiutage fajras ŝtiparumoj...

— Mi estas luterano! — nelaŭte prononcis Des-Fonteines. — Kredu, generalo, ke la agoj de la inkvizicio por mi estas ne malpli abomenaj, ol por vi...

— Ankaŭ pri luteranoj kaj kalvinanoj mi ion scias, — kun kolera subrido respondis Gordon. — Memorfiksi specimenojn de homa krueleco, stulteco kaj idioteco estas inda okupo. Do via Lutero bonvolis nomi Aristotelon princo de mallumo, malica kalumnianto, kapro kaj diablo. Kaj via Kalvino en Ĝenevo forbruligis viva Serveton, kiu en io, nur en io ne konsentis kun li. Kaj, diablo vin prenu, temas ne pri religiaj konfesioj, sed pri via Eŭropo. Do en tiu Eŭropo mi havas konaton, kiu deadmonadis min veturi en Moskvion, li eĉ ĝis

nun estas juĝisto de sorĉistinoj en Fuldo, lia nomo estas Baltazaro Foss, li fanfaronis antaŭ siaj gastoj, ke dum dek sep jaroj li forbruligis naŭcent sorĉistinojn. Naŭcent, sinjoro. Kaj entute en via belega civilizita mondo — pri tio fanfaronas la inkvizitoroj mem — estis forbruligitaj cent mil sorĉistinoj. Cent mil pri nenio kulpaj vivoj, inter kiuj estas knabinoj, maljunulinoj aŭ belulinoj. Pro kio oni forbruligis ilin?

— Eraroj de popoloj...

— Ha, eraroj? — kriis Gordon, mallevante la krurojn de sur la lito. — Al knabino oni donas en la manojn pecon de arda fero, kaj se ŝi ne povas teni ĝin, do ŝi estas sorĉistino? Kaj se povas — sorĉistino duoble. Belulinon oni ĵetas en riveron, se ŝi dronas — ŝi estas sorĉistino, se ne dronas — nepre sorĉistino! Ĉu eraroj de popoloj? Damnita, freneza, abomena mondo, krimuloj, netravidebla obskuro...

— Vi estas en ekstremo, generalo! — decide diris Des-Fonteines. — Al vi, sendube, aperos inflamo en ĉiuj vejnoj kaj sedimentos saloj, se vi ne zorgos pri via sano...

Gordon subridis per sola buŝo.

— Saloj, vejnoj, inflamo, — diris li. — Ĉu vi pensas, ke mi estas tiom stulta? Iru for kaj ordonu porti al mi tason da forta kafo!

La kuracisto riverencis kaj eliris. Gordon komencis vesti sin, sed subite enpensiĝis kaj, trovinte per rigardo la krucifikson, malleviĝis sur la genuojn. Li preĝis pri sendo de trankvilo al la malfacile vivantaj homoj, pri sendo de paco al sia peka animo, pri sendo de racio al tiuj, kiuj perdas ĝin en vantaĵo de vantaĵoj. Lia sulkita per profundaj faltoj vizaĝo de maljuna soldato estis

severa kaj malmilda, sed en la senkoloriĝintaj okuloj tremis larmoj.

— Sinjoro dolĉa, — flustris li, postuleme rigardante al la malgranda krucifikso, — Dio ĉiopova! Ĉu vi ne aŭdas min? Aŭdu, Sinjoro! Helpu kaj konsilu, sugestu kaj instruu, ĉar ne scias mi, kiel travivi miajn restintajn tagojn...

Kiam Anabela alportis al li tason da fumanta kafo, li estis fermanta la bukojn sur siaj ŝuoj.

— Vi devus ankoraŭ iom kuŝi, patro! — diris Anabela.

— Por kio? — demandis Gordon abrupte. — Ĉu por pli longe vivi? Kaj por kio vivi?

Silente li eltrinkis la kafon, ŝtopis per aroma tabako sian pipon kaj eliris el la domo de kolonelo Snivin. En la sama vespero Des-Fonteines kun negaja subrido diris al la kolonelo, ke se la vivo de la generalo pluiĝos, pri kio, kompreneble, necesas peti la Sinjoron, tiam Rusio havos fidelan homon en ĉiuj siaj estontaj elprovoj.

— Kaj ĉu vi supozas, ke la sano de la generalo estas en danĝero?

— Jaroj... multo travivita... ekscitiĝemo de la karaktero...

— Jes, li estas ekstreme ekscitiĝema! — penseme diris Snivin. — Ekstreme. Kun li estas malfacile.

— Por vi kun li estas speciale malfacile.

— Kion vi per tio volas diri?

— Nenion, kolonelo, tute nenion, krom tio, ke apenaŭ la generalo estas tre kontenta pri via agado ĉi tie...

Snivin severe silentis.

7. Antaŭ longa vojo

Nokte antaŭ la 26-a de aŭgusto Petro Aleksejeviĉ estis donanta lastajn dispoziciojn al Ievlev kaj Apraksin, restantaj en Arĥangelsko. En la palaco sur la Mosea insulo kolektiĝis nemultaj homoj, ĉiuj junaj; la sekvantoj pli aĝaj lokiĝis sur barkoj kaj platboatoj, tie estis ne tiel malvaste kaj multe pli oportune, ol en la palaco. Sub egalmezura pluveto estis bone dormi sur molaj plummatracoj, kaj ja venis tempo satdormi kompense pro ĉiuj pasintaj malfacilaj tagoj.

En la manĝohalo de la palaco staris odoro de humideco, pro longaj pluvoj likis la tegmento, akvo egalmezure gutadis sur angulon de la tablo, malsekigadis ŝipajn desegnaĵojn. Petro longe ne rimarkadis, poste koleriĝis. Iom poste sur la tegmento ekfrapis botoj, raŭka voĉo kriis:

— Obaĉjo, hakilon donu, la caro skoldas...

Petro Aleksejeviĉ, pririgardante desegnaĵojn de ŝipoj, konstruotajn en Solombalo kaj Vavĉugo, en la konstruejo de Baĵenin-oj, diris al ŝipestro Flam:

— Ŝarĝu vian ŝipon per bona potaso, rezino, greno plej altkvalita, linon prenu, kanabfibrojn, tabulojn plej bonajn. Oni vidu — iras ŝipo rusa, havas varon perfektan. Komercu honeste, eĉ se kiom ajn malkare por komenco vi vendos — ĉio taŭgas. Kio tie estas malkara, tio ĉi tie estas tre kara. Komencinte mem komerci, ni instigos ankaŭ nian negocistaron al tiu tre utila okupo.

Ŝipestro Flam elprenis ĉibukon el la buŝo, kapjesis:

— Tiel, Siro!

Kaj tuj ree eksnufis per la ĉibuko.

Sur la tegmento ree aŭdiĝis la raŭka voĉo:

— Obaĉjo, ĉu mi la hakilon ĝisatendos, aŭ mi mortos ĉi tie?

Alia voĉo demalsupre respondis:

— En la transpasejo estas Obadjo, remilingon riparas...

La caro elprenis el la poŝo falditan paperfolion, glatigis ĝin, skribis ion per plumo, ekparolis per gaja voĉo:

— Kontraŭ gajnita mono vi alveturigos tion, kio estas skribita en ĉi papero. Ni antaŭ nelonge kun Ievlev kaj Apraksin skribis, eble tio estos kara, tial por ajna okazo ni donos al vi monon. La talerojn, ŝipestro, ne disipu, ŝparu la monon. Fiuloj tieaj, verŝajne, postulos troan prezon, sed ankaŭ vi marĉandu — ne estas hontinde! Sidiĝu ĉi tien, skribu...

Ŝipestro Flam eksidis, Petro deŝiris por li pecon de la folio, komencis dikti:

— Skribu: katunon por flagoj ŝipaj.

— Kiom?

— Laŭ la mono, frato, laŭ la mono. Se estos malkara — pli multe, se kara — malpli. Plue... lanternon aĉetu por pulvotenejo.

— Kiom?

— Ja unu, ŝipestro, dume. Eble, ĝi tute ne taŭgas, la lanterno transmara. Ni rigardos, sekvan fojon kiam vi trans la maron iros, se la aĵo estas bona, ankoraŭ aĉetos. Plue skribu, ŝipestro: sablohorloĝon, ŝipan. Navigistan kofron aĉetu, la plej bonan,

kun tuta navigista ilaro...

— Tre kara! — avertis ŝipestro Flam.

— Do ĝuste unu aĉetu, se estas kara! — ordonis Petro. — Kaj marĉandu, ne tuj prenu.

Ŝipestro Flam nege balancis la kapon.

— Kial? — demandis la caro.

Flam elprenis el la buŝo la ĉibukon, surmetis la plumon, deŝovis de si la paperpecon, sur kiu li skribis. Petro rigardis al li silente, atendis, kion li diros.

— Siro, — nelaŭte ekparolis Flam, — Siro, estas tre malfacile fari tiel, kiel vi ordonas. Neeble, Siro. Ne eblas aĉeti por vi malkare. Ili ridos. Ili ridis, kiam ni konstruis por vi la ŝipon en Nederlando, ili diradis: la rusa caro ne pagos, li estas malriĉa caro, tributon ŝuldas al la tatara Ĥano...

Al Petro abrupte moviĝis la vango, li kaptis kupran kandelingon, leviĝis je la tuta alto. Aleksandro Daniloviĉ ekpendis sur lia ŝultro, Apraksin deprenis la kandelingon, metis ĝin sur la tablon. Petro eksidis, abunda ŝvito aperis sur lia vizaĝo. La lipoj de Apraksin tremis, Menŝikov plu glatumadis la ŝultron de Petro, flustris:

— Ne gravas, Petro Aleksejeviĉ, atendu, Petro Aleksejeviĉ, jen akvon malvarman trinku...

Estis tre mallaŭte, nur la akvo plu gutadis de la plafono sur la tablon. Ŝipestro Flam sidis trankvile, kvazaŭ nenio okazis.

— Vidu, Teodoro, kiel oni diras! — per mallaŭta voĉo diris Petro al Apraksin. — Flam ne mensogas, Flam estas fidinda ulo...

Li forte frotis la vizaĝon per ambaŭ polmoj, kapsignis al la ŝipestro, ke tiu skribu plu:

— Navigistan kofron la plej bonan...

Flam ree prenis la plumon, Petro ordonis per firma voĉo:

— Tri kofrojn. Monon ne ŝparu. Diru — vi aĉetas por rusaj ŝipoj. Se oni demandos, kie estas tiuj ŝipoj, respondu kun subrido: vi vidos! Aleksandro Daniloviĉ, veku Vinius-on, ordonu skribi ukazon de mia nomo, ke ŝipestro Flam kunprenu sakon da taleroj. Ankoraŭ skribu, ŝipestro: kupron en folioj aĉetu, gvajakon, sulfuron...

Venis postdorm-aspekta Vinius, Petro ordonis al Apraksin dikti la ukazon pri la mono. Sur la tegmento ekfrapis hakilo — oni finfine komencis ripari. Petro Aleksejeviĉ alŝovis al si la ŝipajn desegnaĵojn, ree komencis esplori kun Ievlev, kiaj estos ŝipoj. Menŝikov kun kruĉeto da sbiteno alsidiĝis apude, konsiladis, disputadis, Silvestro Petroviĉ subite same ekscitiĝis. Petro brakumis ilin ambaŭ je la ŝultroj, diris flustre:

— Ne estos ni sen maro, ne, ne estos, fraĉjoj...

Ievlev kaj Menŝikov eksilentis, turniĝinte al la caro. Li plu parolis per glata flustro, arde, konvinkite, pasie:

— Ne estos ni sen la Nigra, sen la Azova. Ne estos, ne spiros, ne. Tio veras. Holandanoj, ilia negocistaro, diras — antaŭ nelonge Flam rakontis, — sen la Balta maro dekoble pli malbone estas al la moskvianoj, ol se kun havenoj tie. Nia, ĉio estas nia, — Oreŝko, Ivangorodo, Koporjo... Caro Johano, Ivano Baziljeviĉ la Terura pri tio...

— Ĉu kontraŭ la svedo militi? — kliniĝinte al la caro, kaptinte lin je la mano, demandis Menŝikov. — Petro

Aleksejeviĉ, Siro, indulgu, sub la svedo nun estas tiom da popolo, kion ni povas kun nia mizero...

Petro frapis per la polmo al la tablo, demandis:

— Ĉu vi freneziĝis? Kiu ja pri milito diras?

Li amare subridis, per malmola ungo strekis desegnaĵon de ŝipo, ordonis al Ievlev severe:

— Ĉi luksaĵojn, Silvestro, girlandojn kaj florojn florantajn, forigu por Dio! Ĉu ni riĉas troe, vi pensas? Kaj hodiaŭ mi aŭdis, kiel laborulo preskaŭ dum tuta vespero hakilon serĉadis — por la caro tegmenton sur la palaco ripari. Por la caro, ne por iu ajnulo! Ne donos mi ebonon por dekoracio, ĝin necesas el trans la maro veturigi, kaj kiom la negocistoj postulas, ĉu vi scias?

— Mi scias, Siro!

— Tiele!

Iom poste de sur barko en la palacon venis flava pro malsano Gordon kaj Lefort. La ĝenevano ordonis hejti fornon, doni vespermanĝon. La tegmenton oni finfine riparis, en la manĝohalo iĝis pli varme. Egalmezure, obtuze verŝiĝadis pluvo super Dvino, super ekdorminta Arĥangelsko, super la Mosea insulo, super la caraj barkoj, velboatoj, platboatoj, ŝalupoj, pretaj por longa vojo al Vologdo kaj Moskvo...

Dum la vespermanĝo Patriko Gordon demandis de la caro, kion fari kun signaloj, kiam la ŝiptrajno debordiĝos de la urbo. Petro respondis kun subrido:

— Lasu, sinjoro generalo! Ĉu ni ne sufiĉe ludis? Kiaj signaloj! Vi ankoraŭ Perejaslavlon rememoru kaj la boaton sur

Jaŭzo. Tio estis kaj pasis...

Li kun silenta subrido ĉirkaŭrigardis la vizaĝojn de la sekvantoj, sidantaj ĉe la tablo, penseme aldonis:

— Estis kaj pasis. Ni konstruadis urbon Presburgon, ĉe Perejaslavlo ŝipojn kunpuŝadis, kiom da stultaĵoj estis, kiom da infanaĵoj. Sed hodiaŭ estas ŝtata konsiliĝo, sinjoroj!

Li ekridis kaj levis kruĉeton je la ŝipa konstruado sur la Blanka maro, je ŝipistoj Apraksin kaj Ievlev, je bonaj sukcesoj en la novaj ŝipkonstruejoj. Dum tuta tiu nokto li estis pensema, drinkis malmulte, ofte fajrigadis sian pipon kaj, ŝajnis, fiksaŭskultadis la monotonan bruon de la aŭtuna pluvo. Apraksin-on kaj Silvestron Petroviĉ-on por adiaŭo li brakumis, kisis trifoje, ordonis severe:

— Skribu, fraĉjoj, pro eĉ plej etaj bezonoj. Kiam Flam kun la ŝipo foriros — skribu, kiam la ŝipkonstruado ekmoviĝos — skribu.

Mateniĝe sur la Mosea insulo, sur Solombalo, en Arĥangelsko kaj sur la caraj maraj ŝipoj ektondris kanonoj, salutante la forirantan supren laŭ Dvino caran ŝiptrajnon. La pluvo verŝiĝadis per kontinua vualo, torente. En la cara kuirejo oni estis estingantaj la fornojn, fremdlandaj rajdistoj estis rompantaj, surfalinte ŝultre al la pordo, flankan alkonstruaĵon, en kiu restis medoj kaj vodkoj. Gardisto estis skurĝanta malsaĝulon pro Kristo, kantoroj sub la alero estis elvringantaj la malsekajn ornatojn.

La cara barko iĝadis ĉiam malpli granda, la tutan ŝiptrajnon vualis la pluvo. Ĉe Dvino forte odoris je fumo, je fungoj, Apraksin turnis sin al Ievlev, diris per laca voĉo:

— Nu, Silvestro, ni fingastis. Ni sufiĉe navigis, festenis, vinon drinkis, konversaciis. Nun ni satdormu, kaj al la laboro.

Kaj li kriis al remistoj:

— Hej, homoj! Al remiloj!

Dum ili estis transnavigantaj Dvinon, Apraksin apenaŭ tenis la kapon pro dormemo; hejme, tremerante pro humideco kaj sendormaj noktoj, li deĵetis la malsekajn vestaĵojn, frotis la korpon per aroma Brabanta aceto, surmetis malpezan lanugan peltmanteleton kaj, kun ĝuo tirinte sin, konsilis:

— Kuŝiĝu tuj, Silvestro! Vi aspektas kiel mortanto! Kuŝiĝu, kara, memoru, ke antaŭ nelonge vi preskaŭ ellasis vian animon...

Servisto alportis al Silvestro Petroviĉ puran tolaĵon, odorantan je lavendo, super peltoj sur la larĝa lito per lertaj manoj sternis neĝblankan littukon, rapide disŝovis arĝentajn varmbotelojn kun bolakvo. Ievlev, senvestiĝante, demandis:

— Ĉu vi ne aŭdis, kion hieraŭ la Siro diris pri maroj — la Nigra kaj la Azova?

Teodoro Matejeviĉ leviĝis sur la kubuto:

— Ne aŭdis.

Ievlev rakontis, Apraksin elaŭskultis silente, poste kuŝiĝis sur la dorson. Silvestro Petroviĉ, transvestinte sin per ĉio seka, metis la manojn sub la kapon, tiriĝis per la tuta korpo, enspiris la odoron de lavendo, pensis — ja vere estas bone!

Kaj tuj la ŝipo, en kiu li iris sur nigraj ondoj de la Nigra maro, skuiĝis, surflankiĝis, ekkuris, kaj tiel, ke nur vespere komprenis Ievlev — tio estis ne ŝipo, sed bona, sana bravula

dormo...

Ĉapitro deka

Kruston sen pano glutadis ni,
Nudpiede neĝon tretadis ni,
Al dors' knutitaj estadis ni...

Kanto

Pro tribut' al despot'
Ni fariĝis biskot'.

Rilejev[71]

1. Favoran venton al vi, ŝipistoj!

Mateniĝe en la domon de la vojevodo kun decaj donacoj, bruaj, gajaj, bonanimaj aspekte, venis fremdlandanoj — ŝipestroj, eskortantoj, negocistoj — adiaŭi. Servisto de la vojevodo, laŭ la moro, ronde portadis al la gastoj drinkaĵojn kaj almanĝaĵojn, la eksterlandaj maristoj fumadis pipojn, tintigadis glasojn, frapadis silenteman Apraksin-on al la ŝultro, pikante ŝercadis, promesadis en la sekvonta jaro, kiam malfermiĝos marnavigado, veni sur multaj ŝipoj kun abundaj varoj. Teodoro Matejeviĉ kapjesadis, ridetadis, sed liaj okuloj estis malvarmaj.

Silvestro Petroviĉ, stare, ĉe kandela lumo — en la manĝohalo estis ankoraŭ malhele — legadis dokumentojn — paspermesilojn de ŝipistoj, metadis sigelon, subskribadis pri tio, ke la ŝipo de ŝipestro tiu kaj tiu povas libere foriri laŭ sia vojo. Paspermesiloj estis multaj, Ievlev subskribis la

---

71 Kondrato Rilejev (1795–1826) — rusa poeto, revoluciulo, unu el la organizintoj de la ribelo de la decembristoj (la 14-an de decembro 1825), mortekzekutita pro tio en 1826 *(trad.)*

paspermesilojn de Golgolsen, Koost, Danberg; sed la paspermesilon de Urquhart li demetis flanken.

— Ho! — ekkriis Urquhart. — Ĉu io ne estas en ordo?

Apraksin aliris pli proksime al Ievlev, prenis el liaj manoj la paspermesilon, etendis ĝin al Urquhart.

— Tio signifas?.. — movis la brovetojn la ŝipestro.

— Signifas, ke ni ne plu vokas vin ĉi tien.

La fremdlandanoj ĉesis ŝerci, en la manĝohalo estiĝis silento.

— Mi havos honoron plendi al lia sanktoleita moŝto caro! — ekkriis Urquhart. — Mi donas al vi vorton de honoro, sinjoro vojevodo, ĉi ago ne servos al via utilo.

— Mi tion scias pli bone!

— Vi respondos pri via aroganteco!

— Al kiu? Ĉu al tiu potenculo, kies servon vi, sinjoro, fidele plenumas sur la rusa tero?

Urquhart ŝajnigis, ke ne komprenis, indigniĝis, levis la ŝultrojn.

— La ŝipestro, se deziras, povas ankoraŭ atingi lian sanktoleitan moŝton! — diris Danberg. — Ni ne toleros plu humiligojn pri ni. Jes, jes, respektindega Urquhart, ek al vojo! Ni ĉiuj prokrastos fornavigon, kaj vi havos aŭdiencon ĉe la rusa caro, kaj multaj pagos pro tio...

— Ŝipestro Urquhart povas iri sur sian ŝipon! — trankvile prononcis Apraksin. — Li ne havas paspermeson por io ajn alia. Kio koncernas ceterajn honestajn ŝipestrojn kaj

negocistojn, do mi ne konsilus al ili defendi ŝipestron Urquhart-on, alie mi devos pensi, ke ankaŭ ili ĉi tie estas ne por bona komercado...

Silvestro Petroviĉ palpebrumis al la servisto, tiu aliris al Teodoro Matejeviĉ kun la pleto. Apraksin prenis kruĉeton, levis, diris kun gaja rideto:

— Feliĉan vojaĝon, sinjoroj maristoj. Je dek futoj da akvo sub la kilo!

La ŝipestroj kaj eskortantoj prenis la kruĉetojn: kia maristo ne drinkos je dek futoj da akvo sub la kilo? Ne estas pli vera antaŭsigno: se iu ne drinkos je dek futoj da akvo sub la kilo, tiu surgrundiĝos. Eĉ Urquhart kaj Danberg drinkis, okulumante unu al la alia.

Apraksin tintigis sonorileton, alia servisto alportis malavarajn donacojn al la marvojaĝantoj: po dekduo da peltoj de zibeloj, kaj ankoraŭ musteloj, kaj ankoraŭ guloj. Teodoro Matejeviĉ, delikate ridetante, pridonacadis ĉiun, afable petadis ne memori malbonon, veni kun varoj, alporti pli multajn varojn — la plej bonajn, sen trompo, sen fraŭdo; kalkulo estos per aŭtentika arĝento, ne per falsaĵoj. Urquhart staris en angulo, ŝajnigis, ke la donacoj kaj la vortoj de la vojevodo lin neniom interesas. La fremdlandanoj, akceptante la donacojn, sentis sin iom ĝenate: Apraksin rigardis en iliajn okulojn, kaj lia rigardo estis moka.

Kiam tute tagiĝis, apud la domo de la vojevodo tondris malgranda kupra kanono: tio signifis — la doganejo komencu kontrolon, la ŝipanoj prepariĝu al eliro en la maron.

Silvestro Petroviĉ kaj Apraksin silente staris sur alta perono,

rigardis, kiel de la kajo estis debordiĝantaj doganaj ŝalupoj kun vimploj. Doganistoj kun muskedoj staris en siaj boatoj, vento estis karesanta la malgrandajn vimplojn.

— Kiam li legos la paspermesilon de Urquhart, ekĝojos, verŝajne! — diris Ievlev.

— Kiu?

— Krikov.

— Ĉu la eksa leŭtenanto?

— Li, kompatinda.

— Sed ĉu li estas en la kontrolo?

— Sen li oni ne faras. Li havas klaran kapon.

Super Dvino estis rapide kurantaj nuboj — pezaj, jam aŭtunaj. Kaj vento blovis malvarma, norda, kvazaŭ minacis: atendu, vi baldaŭ ekscios, kie vi vivas! Silvestro Petroviĉ frostosenteme kuntiriĝis, diris al Apraksin:

— Skribos, mi pensas, Urquhart plendon pri ni?

— Skribos! — subridis Apraksin. — Li havas proprajn homojn en Kukujo, sed ankaŭ niaj en Rusio troviĝos. Espereble, tio ne havos sekvojn. Ne ĉiu kuglo trafas en la frunton, iuj trafas en arbustojn...

Li turniĝis al la kanonisto, diris pafi duan fojon. La kanono ree tondris: la dua pafo signifis — la fremdlandaj ŝipoj prepariĝu levi la ankrojn.

— Kial tro rapide? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Sed kion fari? Jen, vento por ili ekblovis favora, se ili prokrastos — ĝi ĉesos, ili ree sur la bordon iros. Sufiĉas, finiĝis

la festo, tempas foriri...

La doganistoj revenis baldaŭ, Apraksin ordonis al pafisto-gardisto urĝe kuri al la kajo, voki al la vojevodo kaporalon Krikov-on. La pafisto, disŝprucigante koton per la botoj, levinte la baskojn de la kaftano, ekhastis, ekkuris.

Atanazio Petroviĉ aliris, riverencis, — laŭ lia vizaĝo nenio estis komprenebla.

— Ĉu ĉio estas en ordo sur la ŝipoj? — demandis Teodoro Matejeviĉ.

— Ĉio ŝajnas en ordo, princo-vojevodo.

— Ĉu ŝipestro Urquhart regas sin? — iomete ridetinte, demandis Apraksin.

— Ŝipestro Urquhart ne tute regas sin! — konservante respektemon, per severa voĉo, sed kun apenaŭ rimarkebla subrido en la okuloj eldiris Atanazio Petroviĉ. — En sia kajuto li sian paspermesilon ŝipestran tretis per la botoj kaj la perukon de si ĵetis planken. Ĉiele malhonoris nian urbon Arĥangelskon kaj niajn ordojn.

— Ĉu sinjoro James ĉeestis tion?

— Sinjoro James, princo-vojevodo, hodiaŭ pro malsano al la ŝipa kontrolo veni ne povis.

Apraksin kapsignis:

— Do... iru, kaporalo...

Krikov, retenante la sakon ĉe la kokso, kiel en la antaŭaj tempoj la spadon, ekiris al la pordego. Ievlev vokis lin:

— Atanazio Petroviĉ!

La eksleŭtenanto haltis, en lia vizaĝo, ĉiam firma kaj trankvila, io tremeris: oni vokis lin ne laŭ la kaporala titolo, sed per la nomo kaj patronomo. Ievlev ekiris renkonten al li, diris, retenante emocion:

— Atanazio Petroviĉ, vi atendu. Via embaraso ne estos eterna. Hodiaŭ la afero ne solviĝos, morgaŭ same, sed kun tempo eble ĝi faciliĝos. Servu, Atanazio Petroviĉ.

— Jen mi servas! — simple respondis Krikov. — Sed ja...

Li mansvingis kun malespero.

— Hodiaŭ estas tiel, sed tempo pasos — oni min forvoros viva, Silvestro Petroviĉ. Majoro James nur la vojevodon kaj vin timas...

Ree tondris la kanono, la tria pafo signifis: la ŝipoj levu la ankrojn, iru en la maron, favoran venton al vi, ŝipistoj, bonan vojon.

— Adiaŭ, Atanazio Petroviĉ! — diris Ievlev. — Se estos io — venu...

Krikov riverencis, ekiris al la pordego.

Ievlev revenis en la domon. Vojevodo Apraksin jam sidis ĉe ŝipaj desegnaĵoj, fumis la pipon, kalkulis per grifelo sur ardezo. Ekvidinte Silvestron Petroviĉ-on, li diris:

— Nu, ŝipisto, alsidiĝu apude. Ni lernu, dum estas tempo. Poste ni ne sukcesos, mi pensas...

2. En aŭtuna nokto

Vespere, kiam Ievlev revenis de la Kanona korto[72], ĉe la vojevodo estis Jozefo Baĵenin. Teodoro Matejeviĉ subskribadis paperojn, Baĵenin surŝutadis la subskribojn per sablo.

— Nu, kio estas ĉe ili en la Kanona? — ne turnante la kapon, demandis Apraksin.

— Nur sola nomo estas — Kanona! — diris Ievlev.

Baĵenin etendis por la paperoj la manon — la dikaj fingroj en ringoj kun gemoj tremis.

— O ho! — subridis Teodoro Matejeviĉ. — Mi vidas, kortuŝa estis la adiaŭo kun la Siro en Ĥolmogoro?

Kaj li kun krako mordis sukoplenan pomon.

La okuletoj de Baĵenin kolere ekbrilis el sub la ŝvelintaj palpebroj: junas la vojevodo, sed kiel parolas! Atendu, ni iam vin premos, tiam vi jelpos, ploros kortuŝe, Teodoro Matejeviĉ! Eĉ ne al tiaj ni rompadis dorsojn!

Sed li nenion diris, riverencis, suspiris, kvazaŭ pente.

— Do komencu! — diris Apraksin. — Prokrasti ne necesas! La homoj lignon veturigu, segu, ĉirkaŭhaku. La ŝipkonstruejoj ankoraŭ ne estas finkonstruitaj, nenie estas ordo. La volo de la caro, vi mem scias, Petro Aleksejeviĉ ŝerci ne ŝatas. En proksimaj tagoj mi kun Silvestro Petroviĉ mem venos rigardi, kiel vi faras. Se ni vidos, ke malbone, ni ne kompatos. Ja vi sidiĝu, kial vi staras, sido pli bonas ol staro. Ĉu vinon verŝi?

Baĵenin eksidis, la seĝo de fremdlanda laboro sur leonaj

---

72 Kanona korto — nomo de produktejo de armilaro en multaj rusaj urboj de tiu tempo. *(trad.)*

piedoj krakis sub lia korpulenta korpo. Ŝajniginte sin bonanima, respektema, eĉ timida, li diris, ke ne aŭdacas, alie li petus vodkon — por refreŝiĝi per drinko post la ebrio. Teodoro Matejeviĉ rigardis al li duonferminte la okulojn, malvarme, nefideme, frapetante per la fingroj la tabloplaton.

Jozefo Andrejeviĉ renversis en la harkovritan buŝegon la glaseton, krakigis kukumon, per la dikaj fingroj kaptis pinĉaĵon da fermentinta brasiko, ekparolis timide:

— Kaj veron vi diras, Teodoro Matejeviĉ, tempas labori, vere! Tempas kaj lignon transporti, kaj trunkobazojn prepari, kaj segi, kaj ĉirkaŭhaki. Sed kie estas la popolo, sinjoro kara? Per kio ĝin allogi? Ordonu, instruu! Ĉu homojn de iliaj propraj aferoj eblas delogi al la cara konstruejo? Unuj bezonas ĉasi, bestojn akiri, aliaj fiŝon peklas, triaj en sia metio laboras — iu estas bulkisto, iu — kupristo, iu — barelisto. Iuj lokaj loĝantoj la teron per plugilo skrapas — eble ĝi se ne panon, tiam almenaŭ brasikon donos, — almenaŭ ne kun malplena ventro ili sidos...

Li ankoraŭ prenis pinĉaĵon da brasiko, malgaje balancis la kapon:

— La matrosoj, kiuj estis prenitaj sur la carajn ŝipojn, eĉ tiuj ne volonte sidas, eblas eĉ per ĉenoj alkateni...

Teodoro Matejeviĉ levis la pokalon, turnis ĝin antaŭ la kandelo, admiris pri la koloro de la vino. Jozefo Andrejeviĉ plu estis plendanta. Ne nur el la ĉi-tiea konstruejo, — el la arbara Vavĉugo ĉiuj fuĝis. Li vokis popon por admoni la popolon, sed estiĝis tia malhonoriga kriado, ke la popo la sutanon levis — kaj kuris en la arbaron. Oni apenaŭ sukcesis lin poste retrankviligi per akvo. Ĉu tiajn eblas regi?

— Manĝi vi ne donas, tial oni fuĝas de vi! — malmilde diris Apraksin.

Baĵenin ekridis, turnis la dikan kolon, diris per grasa voĉo:

— Ho, pekas vi, Teodoro Matejeviĉ, pekas, karulo! Manĝi mi ne donas! Sed ĉu ilin, diablojn, eblas sate nutri? Kaj ĉu ili solaj je nia kosto negocista vivas? Al ĉiuj mi donu, ĉiujn prizorgu, ĉiujn pridonacu, pri ĉiuj memoru. La vojevodo al ni estas por profitoj postenigita. Kiu al li kun donacoj la unua iras? Baĵenin Jozefo Andrejeviĉ...

Apraksin ekflamis, demetis la pokalon, diris kolere:

— Vi mensogu, sed ne troe, barbulo, alie...

Baĵenin eksvingis la mallongajn brakojn.

— Kristo kun vi, Teodoro Matejeviĉ! Ja ĉu ni ne komprenas! Ja ni same estas homoj, kristanoj, ĝuste tial mi al vi diras, ke mi scias, kia vi estas homo. Vi estas tia homo, ja je Dio, ja ni...

Sed la okuletoj el sub la brovoj rigardis arogante, malice.

— La nutromonon necesas doni plene, — enmiksiĝis Ievlev. — Domon konstrui ĉe la konstruejo, por ke tie loĝu la laboristoj. La ĉi-tiea tero naskas malbone, nun estas aŭtuno — ĝis ĉasado estas malproksime, por fiŝado same ne estas tempo. Donu bonvole la nutromonon kaj la caran salajron — kaj la Arĥangelskaj homoj volonte iros konstrui ŝipojn...

Baĵenin mallaŭte ekridis, ŝajnigante sin surda, per la manplato turnis la karnan orelon:

— Ĉu? Volonte, vi diras? Ho, sinjoro mia, sinjoro, kara Silvestro Petroviĉ, pardonu min, kampulaĉon, pro simpla

parolo, junas vi ankoraŭ, tro junas, ĉu tiele eblas?

Ievlev ŝultrolevis, eksilentis, ne komprenante, kion deziras Baĵenin. Apraksin per arĝenta pinĉilo demetis karbiĝintan finon de la kandela meĉo, ne rigardante al Silvestro Petroviĉ, demandis:

— Do kion fari?

Jozefo Andrejeviĉ dismovis la manojn. Apraksin leviĝis, kelkfoje trairis la manĝohalon. Baĵenin, tuta etendiĝinta antaŭen, borante per la okuloj la vojevodon, atendis la decidan vorton.

— Ĉu ŝuldantoj multas en la urbo kaj apude? — subite demandis Teodoro Matejeviĉ.

Baĵenin respondis rapide, kvazaŭ estis preta al la demando de Apraksin:

— Preskaŭ ĉiuj. Kaj fiŝistoj, kaj peĉfaristoj, kaj salistoj, kaj ĉasistoj, — ĉiuj estas en ŝuldoj, eĉ unu puran dvinanon mi ne vidas, krom riĉuloj.

Teodoro Matejeviĉ interrompis:

— Ŝuldantojn preni kaj — al la ŝipkonstruejo. Por samojedoj en la tundron ni sendos rajdistojn, ĉiujn ni prenos plene. En malproksimaj fuortoj, en fiŝistaj kampadejoj multaj homoj libere vivas, — ĉiujn ni pelos al la ŝipkonstruejoj. Ĉasistojn, metiistojn, kupristojn, bulkistojn, portistojn, vagantan ekspopon, pilgrimanton, kiu al Solovkio iras, — ĉiujn ni prenos, ĉiuj konstruos la caran floton...

Baĵenin leviĝis, malalte riverencis. Liaj moviĝoj iĝis hastemaj, li ekparolis rapide, li ĵuris je Dio, krucosignis sin

antaŭ la ikonoj, retroiris al la pordo. Sed Teodoro Matejeviĉ ne lasis lin foriri, manvokis al si. Baĵenin, palpebrumante, snufante, aliris. Apraksin diris al li nelaŭte, kun minaco en la voĉo:

— Nutromono — ses altinoj. Se vi ŝtelos tion, kio estis donita por laboristo, indulgon al vi ne atendu. Mi scias, de vi multaj prenas, postulas koruptaĵon, — tiam vi la koruptulon sendu al mi. Mi venkos. Se lignon por ŝipoj vi liveros humida — mi vin putrigos en monaĥeja kelo, neniu eĉ scios, kie mortis Jozefo Baĵenin.

Jozefo Andrejeviĉ levis la manon por krucosigno, Apraksin stamfis, kriis:

— Ne sakrilegiu! Vi ne al Dio preĝas — al talero; vi estas lupo, latrono, sola via dio estas monsako. Sidu kaj silentu. Mi sendis por Snivin, necesas la aferon urĝe fari.

Baĵenin ree eksidis sur la seĝon, grimacante demandis:

— Se mi tiom malbonas, kial vi min tenas, Teodoro Matejeviĉ? Vi povus mem ŝipojn konstrui!

Apraksin ne respondis, ĉiam iradis el unu angulo en alian. Silvestro Petroviĉ same silentis, pensis siajn negajajn pensojn: oni pelos la popolon kontraŭvole, la homoj tintigados ĉenojn, kiel kun tiaj ŝipistoj konstrui ŝipojn?

Snivin eniris flanke, riverencis, per movo de la ŝultro deĵetis de si larĝan, malsekiĝintan sub pluvo mantelon, levis la lipharojn dise. Ŝtopante per la dikfingro la pipon, li ekparolis, kvazaŭ knarigis feron:

— Mi havis honoron iom pensi pri tio, kion vi, sinjoro, proponis al mi. Mi havas planon de agado. Granda biendomo

anstataŭos malliberejon por ŝuldantoj. Ni faros alarmon, kaj ĉiuj, kiuj ne havas plenan pagon...

— Galimatio! — diris Apraksin. — Kia malliberejo por ŝuldantoj! Tio daŭros tro longe. Vi faros alarmon kaj de ĉiuj metiistoj postulados kvitmarkon...

Li fosis en la poŝo, elprenis ŝirpecon de ledo kun brulstampo, ĵetis sur la tablon.

— Ĉi marko signifas, ke ĉiuj impostoj estas pagitaj. Se tia marko ne estas, preni kaj — al la ŝipkonstruejo. Fari tion urĝe, nokte, laŭ tamburado kaj trumpeta alarmo. Fari en granda sekreto. Antaŭ ol vi komencos patroli kun rajdistoj, en ambaŭ ŝipkonstruejoj — kaj en Solombalo kaj en Vavĉugo — necesas iajn domojn konstrui por laboristoj. Nun estas aŭtuno, baldaŭ venos frostoj...

Snivin, aŭskultante, elprenis el sub la manikroverso mapon, lerte malfaldis ĝin kaj, almontrante per la pipo, interrompis:

— Jes, sinjoro, mi komprenas vin. Mi petas rigardi ĉi tien. Ĉi tie estas Kurjo, Solombalo; vilaĝoj — Jakokurska, Iĵemska, Prilucka. Kaj plue — Keĥto, Nenokso. Vidu ĉi tie — Solzo, Ĥolmogoro; antaŭurbo Kurcevo, Glinko, la Supra duono, la Ivanovska rando. Multaj homoj, multaj laboristoj, — la signon havas neniu...

Li demande ekrigardis al Apraksin, tiu kapjesis. La kolonelo faris sur la mapo magian ringon, ekridegis, frapis la tablon per la polmo:

— Kiel en muskaptilo. Neniu foriros! Ducent laboristoj, tricent, kvarcent. Ili laboros! Laboros tre diligente, tre respekte, kaj tage kaj nokte laboros. Vi estos kontenta, sinjoro Baĵenin

estos kontenta, la Siro estos kontenta!

Kiam Baĵenin kaj Snivin foriris, Silvestro Petroviĉ kun amaro en la voĉo diris:

— Kiel mi vidas, Teodoro Matejeviĉ, la fremdlandano pri ĉi aferoj mirinde bonas. Kiu rusan laboriston je la gorĝo prenu, se ne transmara loĝanto. Kaj nur tial, ke kompaton la fremdulo al nia popolo havas neniom. Kaj por kio kompati? Por kia profito?

Apraksin silentis, ludante per kupra granda cirkelo.

— Timas mi, Teodoro, — mallaŭte diris Ievlev. — Tiele timas, per vortoj mi ne povas esprimi!

— Kion do vi timas, Silvestro Petroviĉ?

— Ja tion mi timas, sinjoro vojevodo, ke tro serioza afero estas entreprenita. Kaj sentas mi — ne unu, ne du, ne tri homoj mortos per malbona morto en niaj konstruejoj. Kies peko tio estos?

— Je Dio, kara, — malmilde subridis Apraksin. — Se pekon timi — infanojn ne naski, tamen ni naskas. Nu, mortos, sed kiel ili ĝis nun vivis, ĉu tio ne estis por ni peko? Kaj ankaŭ en la malnovaj tempoj ĉu malmulte da homoj per kruela morto mortadis? Ĉu malmulte vi vidis batitojn, vunditojn, ebriiĝintojn per vodko en caraj drinkejoj, frenezulojn pro bona vivo, tretitojn per ĉevaloj, sabritojn de tataraj sabroj, kaptitojn de la livonaj kavaliroj, de la svedaj, kiuj finis sian malfeliĉan vivon en foraj malicaj teroj? Ĉu pri tio pensas ni, Silvestro?

Lia rigardo brileris severe kaj rezolute, li aliris al Ievlev, demandis:

— Kio por la homo estas Rusujo?

Silvestro Petroviĉ ne respondis, rigardante al Apraksin.

— Bonkora patrino — jen kio devas esti ĝi por la rusa homo, — eldiris Teodoro Matejeviĉ. — Por ĝi eĉ morti ni devas, se malamiko penetros. Por ĝi, Silvestro, por patrino-Rusujo, kiu flegis nin kaj prizorgis, karesis kaj kompatis, instruis kaj dorlotis, super lulilo lulkantojn kantis kaj fabelojn rakontis, kiu admire rigardis al la infano, kiel li unuafoje en la selon leviĝis, kiu kun kareso lin admonis, se li estis maljusta kaj peka, malbona estis, kiu ankaŭ dolore instruis per skurĝo pro maljusta faro. Ĉio ĉi estas ĝi — la hejma, ĝi kaj instruos, kaj kompatos, patrino Rusujo. Ĉu tiel, Silvestro? Ĉu mi ĝuste diras? Respondu...

— Ja ĝuste, Teodoro Matejeviĉ, sed ja ne tiom dolĉe tio en la realo fariĝas...

— Atendu, aŭskultu, Silvestro, kion mi dum tiuj ĉi tempoj trapensis en noktoj ĉi tie, en la urbo Arĥanĝela: ni havas homojn, sed floton veran ni ne havas. Ni havas batalistojn, sed armeon veran, fortan ni ne havas. Havas ni kapojn saĝajn, sed lernejojn, akademiojn — ne! La fremdulo grandegan potencon super ni prenis, nin severe traktas vicpatro, el la bona patrino li minacas por ni la patrujon fari vicpatrino. El la tuta Rusujo la fremdulo trovis lumon nur en Kukujo. Sur nia nutro leviĝinte, li nin en siaj libroj senhonorigas kiel barbarojn kaj senhonte skribas, kvazaŭ li nin malkovris, surmapigis kaj per sia edifo nin instruis. Ne tio estas timinda, Silvestro, kion ni atendas, sed tio estas timinda, kiel ni vivis ĝis tiu ĉi tempo. Per malfermitaj okuloj necesas antaŭen rigardi, scii, al kio ni iras. Ĉu vi memoras, kiel antaŭnelonge ŝipestro Flam pri la tatara ĥano

rakontis? Ne nin tio senhonorigas kaj malgloras, sed nian patrinon — Rusujon. Kaj tial estas netolereble por ni aŭskulti ĉi senhonorigon. Malfacilege estos por ni, Silvestro. Multon ni transpaŝos. Se ni ĝisvivos, tiam la nunan ŝipkonstruadon ni ankoraŭ rememoros per bonaj vortoj, ĝi ŝajnos al ni ŝerco, ĉar ĝi estas nur komenco, kiel la amuziĝoj en Perejaslavlo-Zalesskij. Kaj ja timindaj ŝajnis tiutempe tiuj ĉi amuziĝoj — kun mortoj! Ni ne havas revenan vojon, Silvestro Petroviĉ, kaj ne indas por ni, amiko mia, nun pri pekoj pensi. Ni penu fari honeste, pri niaj profitoj ni ne zorgu. Kion do ankoraŭ? Ke ni kontraŭvole la laboristojn pelas al la ŝipkonstruejoj? Instruu, kiel fari alie, mi faros...

Silvestro Petroviĉ silentis. Lia rigardo estis malgaja.

— Jen, vi silentas! — diris Apraksin. — Kaj rezultas, frato, ke per kio respondi al miaj vortoj vi tute ne havas...

Kaj, karesinte la ŝultron de Ievlev, li aldonis:

— Eĉ ne tio ankoraŭ estos! Eĉ ne tion ni vidos!

— Ĝuste tion mi timas! — morne respondis Silvestro Petroviĉ. — Timas mi, Teodoro, ke ni vidos tian... tian... ke prefere ni ne vidu entute...

Apraksin konsentis:

— Vere. Krutan ni havas vojon, tio veras — krutan...

3. Ekspedicio en la tundron

Por ne pezigi la rajdistojn, majoro James ordonis preni nemulte da provianto — salon, biskotojn, po peco da sunsekigita viando. Sed da pulvo kaj kugloj ili prenis pli multe.

Por la majoro mem, por liaj aĵoj, estis selitaj du ĉevaloj: majoro kunhavis bonan tendon, faldoseĝon, bovlon por lavi sin, telerojn, kruĉetojn, grandan botelon da vodko. Laŭ konsilo de kolonelo Snivin, rusojn ili ne prenis kun si.

— Tra ili samojedoj ekscios, por kio vi vizitis la tundron. Samojedoj ĉion rakontos unu al la alia, kaj vi ne venigos eĉ unu sovaĝulon.

— Sed komence ni bezonos ruson, — ne konsentis la majoro. — En la tundro estos malfacile, sinjoro. Ĉu entute sen la lingvo?

Kolonelo Snivin nenion respondis. Kancelariano Gusev, kliniĝinte al papero, skribadis ordonon de la estro de la pafistoj al aliaj estroj. Majoro James — en armaĵo kaj alta ĉapo kun fero, por ke la kapon ne rompu iu samojedo, en mallonga skvamkiraso super peltaĵo — iradis tra la domo, fumadis pipon, kapjesadis al abruptaj ordonoj de kolonelo Snivin. Sub la glima fenestro bruis rajdistoj, ridis, luktis inter si, iris ĉene unuj al la aliaj — kiu kiun elpuŝos de sur la loko, ne tuŝante per la manoj, brusto al brusto.

Por akompani la forirantojn kolonelo Snivin eliris sur la peronon.

Ĉi tien venis pastro — por adiaŭe edifi la soldatojn per la Dia vorto. La rajdistoj demetis la ĉapojn, viciĝis duoncirkle, la pastro ekparolis pri la granda misio kristana — porti al paganoj la vorton de Dio. Snivin tusetadis. Majoro James provadis per la fingro la selrimenojn — ĉu bone teniĝas sur la ĉevaloj la aĵoj, necesaj por li en la ekspedicio.

La pastro levis la manojn al la ĉielo, la rajdistoj ekkantis

psalmon.

Kolonelo Snivin diris al la pastro:

— La vorto de Dio tute ne rilatas al la afero, mia patro. La soldatoj iras tute ne por konverti la samojedojn...

La maljuna pastro ŝultrolevis.

Ĉe grakado de malsekaj, plumhirtaj kornikoj, sub eta pluvo la taĉmento elveturis el la korto. Majoro James estis fajfetanta — li havis okazojn esti eĉ en pli timindaj embarasoj. Sed ĉi tie estas nur samojedoj. Bagatelo!

En la dua semajno de la vojaĝo la taĉmento eniris en kvietan vilaĝeton, kvazaŭ formortintan sub monotona senfina pluvo. Apud la unua domo, disstariginte larĝe la maldikajn kruretojn kun firmaj hufetoj, kun klinita kapo staris juna boaco. Serĝento Colney ĵetis maŝon, trenis la boacon al si, alia rajdisto batis la boacon per tranĉilo en la koron. Ankoraŭ kelkaj homoj kun krioj kaj fajfoj kaptis freneziĝintan boacan jungitaron, kiu estis ĵetiĝanta inter la domoj. Serĝento Colney ankaŭ ĉi tie iĝis la unua — li surĵetis la maŝon sur la gvidantan boacon. La tuta jungitaro falis en likvan koton.

La boacojn ili samtie, sur la strato, senfeligis, samtie ili trinkis la varman sangon. Colney asertis, ke al li diris fidindaj homoj, ke kvazaŭ freŝa boaca sango estas la plej bona kuracilo kontraŭ la nigra morto, alivorte — skorbuto.

En barilpordo de la randa domo aperis alta homo, barbhava, en longa kaftano. Li balancis la kapon, silentis. La rajdistoj kun tranĉiloj en la manoj, multharaj, malpuraj, interrompante unu la alian, demandadis, ĉu malproksime estas la samojedoj, kaj postuladis malfermi la pordegon, hejti fornojn, kuiri boacan

viandon.

La unua en la domon eniris majoro James, eksidis sub la ikonoj. La mastro alportis nuksojn, metis sur la tablon. James demandis ruse:

— Kie estas la samojedo?

La mastro de la domo malĝoje suspiris, ekrigardis al James, respondis:

— Ne bone vi faras, jen kio! Samojedo estas kiel eta infano, lin ofendi estas simple por ajnulo! Kaj vi amase veturajn boacojn buĉis, ĉu oni tiel faras? Ankaŭ ni antaŭ ili pekas: estas ĉi tie iuj, kiuj fiagas — vinon al ili vendas, kun la ebriaj interŝanĝojn faras, sed vi estas eĉ pli malbonaj...

— Tamen gardu vin! — kriis la majoro kaj frapis la tablon per la polmo.

— Ne peku! — tute severe diris la mastro. — Tablo estas Dia mano, sur ĝi al vi la Sinjoro panon alportas, sed vi ĝin batas. Kaj la ĉapon demetu: ja en Rusio vi troviĝas...

Majoro James rigardis iom al la severa mastro, pensis kaj demetis la ĉapon kun fero.

— Ni bezonas gvidiston! — diris la majoro. — Ni bone pagos. Li montru, kie estas la samojedo.

— Kaj li nun estas nenie! — diris la mastro. — Li, sinjoro, foriris. Jen vi liajn boacojn buĉis, kaj li ekkuris rakonti al ĉiuj siaj samgentanoj, kiaj homoj venis al Podgorjo. Nun ne trovos vi la samojedon. Ĉiuj foriros.

— Sed ne, ne foriros! — ekkriis James.

Profunde sur la orelojn surŝovinte la pezan ĉapon, li ekstaris

kaj ordonis doni al si ĉevalon. La trumpetisto sur la strato ekludis «militiron». La rajdistoj sendezire sidiĝis en la selojn. Serĝento Colney en la sama maŝo, per kiu li kaptis la boacon, venigis la samojedon — sen ĉapo, grizharan, kun maldensa barbeto. La samojedo estis kaptita trans la vilaĝo, kaj nun li devis iĝi gvidisto.

— Ho! — diris majoro James. — Ni estos bonaj amikoj, ĉu vere? Ni ne ĉagrenu unu la alian. Colney, donu al li drinki!

Colney verŝis al la maljunulo drinkaĵon kaj iomete malstreĉis la maŝon sur lia maldika kolo. La maljunulo drinkis, maĉis per la lipoj. En krepusko majoro James deklaris noktan bivakon. La maljunulon oni sidigis apud la lignofajro, ne demetante de li la maŝon. La maljunuleto per infanaj okuloj rigardadis al ĉiuj flankoj, poste prenis el la sino lignan bloketon kaj vipis ĝin per vergeto.

— Kion li faras? — demandis James.

— Li sian dion punas! — divenis la serĝento. — Embarasigis lin la dio. Pro ĝi li al ni trafis, la samojedo.

Nokte la maljunuleto strangolis sin per la maŝo. Ne intence, certe. Li simple volis fuĝi, kaj la rajdisto, kiu gardis lin, tro forte tiris...

Ili estis devigitaj reveni al la vilaĝo kaj preni tie per forto rusan knabon. Post ankoraŭ unu semajno la taĉmento en krepusko eliris el densa arbustaro sur maldensejon, kie brulis fajroj kaj furioze bojis hundoj. Tra granda grego da boacoj la rajdistoj apenaŭ trapuŝiĝis al konusformaj ĉumoj[73], deĉevaliĝis,

73 Ĉumoj — similaj al vigvamoj tradiciaj konusformaj portempaj loĝejoj (tendoj) de nomadaj popoloj de Siberio kaj ekstrema nordo de Rusio. *(trad.)*

ekiris tien, de kie aŭdiĝis infana plorado, homaj voĉoj, tusado. Ili ligis homojn samtie, en la ĉumoj, ne komprenante, kiun ili ligas — ĉu virojn aŭ inojn. Kiam ili komprenis, evidentiĝis — da viroj estis nur kvar, la ceteraj estis aŭ kadukaj maljunuloj, aŭ inoj. Estis ankaŭ infanoj.

Unu el la lasta ĉumo foriris, fuĝis.

Majoro James ekfumis la pipon, etendis la krurojn al la fajro, enpensiĝis. Nemalproksime, sur ankoraŭ ne preparitaj feloj, estis mortanta serĝento Colney — lin forvoris febro. Ankoraŭ unu rajdisto — fortega kaj inteligenta Hughes — dum tiu ĉi ekspedicio komencis sputi sangon. Ĉu estas senco iri pli profunde en tiun damnitan tundron?

Post taga bivako kaj ripozo ili ekiris pluen. La kaptitajn samojedojn ili kondukis en lazoj, sed tiel, ke neniu el ili povu strangoliĝi. Post ankoraŭ tri tagoj da vojo ili trovis spurojn de foririnta nomadejo...

Vespere ĉi tie ili entombigis serĝenton Colney-on. Ne troviĝis dezirantoj eĉ elhaki por li krucon. La rajdistoj murmuris. Foje la majoro aŭdis, ke oni intencas murdi lin. Tio estis ne ŝerco. Dungosoldatoj scipovis murdi siajn komandantojn.

Kiam subite en nokto malaperis la rusa gvidisto, James decidis reveni. Dum la vojo al Arĥangelsko ili entombigis ankoraŭ du rajdistojn kaj du samojedojn. Majoro James rajdis morna, ankaŭ lin estis skuanta febro.

En Podgorjo la taĉmento haltis por ripozo. La severa mastro, kiu dum la vojo en la tundron regalis ilin almenaŭ per pinaj nuksoj, nun ne diris eĉ vorton, sed nur balancadis la kapon kaj

suspiradis. La rajdistojn timis ĉiuj, kun ili neniu parolis, infanoj forkuradis de ili.

En Arĥangelskon majoro James venigis unu samojedon — maljunulon Pajga-n.

— Vin eblas gratuli! — diris tra la dentoj kolonelo Snivin. — Kontraŭ kvar rajdistoj — unu maljunulon. Bone.

James silentis. Al li estis tutegale: li nur kuŝiĝu en liton!

4. Kolonelo Snivin laboras

En la noktomezo la 9-an de oktobro kolonelo Snivin ordonis al la servosoldato bloveksciti fajron kaj infuzi kafon. Trinkinte kafon en la lito, li ekfumis la pipon kaj komencis vesti sin — kiel ĉiam kun skrupulo kaj ekzempla diligenteco.

— Mia amiko, ĉu al vi minacas danĝero? — demandis Anabela, rigardante al la edzo per dormemaj okuloj.

Kolonelo Snivin helpe de la servosoldato estis vestanta sub la ledan maŝkirason ankoraŭ malgrandan ŝtalan brustoŝildon — tiajn forĝadis hispanoj el bona toleda ŝtalo.

— Ho ne, mia anĝelo! — diris kolonelo Snivin. — Estas tute nenia danĝero. Sed kial ne uzi antaŭgardajn rimedojn, eĉ se superfluajn...

Li kisis la edzinon, facile tiklis al ŝi la mentonon, bruante per la spronoj eliris.

En la korto estis krakantaj tamburoj, fajfantaj fifroj kaj klarionoj. Ĉio estis malseka kaj nigra ĉirkaŭe — kaftanoj, seloj, sabroj, pistoloj. Pafistoj batadis la ĉevalojn al la dentoj,

serĉadis la estron, lin atendis kolonelo Snivin. Ĉe lumo de lanterno, kolektinte la dekestrojn kaj duoncentestrojn de la pafista regimento kaj la oficirojn de la rajdistoj, Snivin montris la kvitmarkon, ĵetante ĝin sur la polmo, klarigis, kiel necesas preni homojn al la cara ŝipkonstruejo por konstruado.

La dragonoj jam ekveturis al Ĥolmogoro — preni ŝuldantojn por la ŝipkonstruejo de Baĵenin. La rajdistoj, dogansoldatoj kaj pafistoj estis disveturantaj al antaŭurboj de Arĥangelsko — tra Kurjo, al Muskoj, en Solombalon, al Kuzneĉiĥo. En la tuta argilriĉa Ĵabinska kabo glitadis ĉevalaj hufoj, fajfadis skurĝoj, tintadis en humida obskuro armiloj. La vicojn de pafistoj estis fermanta lanternisto — li portis en lanterno fajron, se necesos pafi.

Kolonelo Snivin silentis, frapetante la ĉevalon per la mano en ganto kun larĝa mansupro, observis la ordon, por ke neniu konfuzu ion. Du pafistoj, postiĝinte, estis elveturantaj el la korto, interparolante inter si. Snivin fiksaŭskultis.

— Anatemo, diablo grasa, kvitmarkojn postulas! — diris unu. — De kie ilin preni?

— Proprajn homojn kapti — pro kio? — demandis la alia.

Kolonelo Snivin ordonis al ambaŭ deĉevaliĝi. Ili aliris lin, li komencis vipi per skurĝo la vizaĝojn, aldirante:

— Anatemo, diablo grasa, ĉu tiel? Estas mi — diablo grasa? Kaj vi estas rusa porko, kaj mi por vi estas dio!

Unuavice oni komencis kapti dormantajn ŝarĝistojn apud la Komerca korto. Unu falis sur la genuojn en koton, plorkriis:

— Kion vi faras, kruelaj, nia salajro estas du rubloj por jaro, kaj eĉ tiu ne estis pagita, iun ajn demandu, ĉu vi estas homoj aŭ

hundoj...

La rajdisto piedbatis la ŝarĝiston per altboto, la pafistoj malaprobe insultis...

— Kial vi batas, hundo, li havas hernion, vidu, li estas blua...

En lumo de peĉaj torĉoj oni katenis la ŝarĝistojn, pelis en la arestejon — por kolekti. Samtempe kaptiĝis sakristiano, lin oni ĵetis en la keletaĝon. Oni tordis la brakojn al impostataj metiistoj, ligis kupriston, du kvasistojn, amase pelis fiŝistojn — laborantojn de la Blanka maro. Neniu estis komprenanta ion, la pafistoj oĥadis: «hodiaŭ ni vin ligas, morgaŭ oni nin ligos». Nur fremdlandanoj rigardis per enuaj okuloj — ilin tia okazintaĵo ne koncernis, ili ne pagadis al la fisko.

Ĉe la mateniĝo aŭdiĝis bruego en la vestiblo de avino Eŭdoĥa. Rjabov elŝovis la manon el sub la varma ŝultro de Taisja, levis la kapon. Dragonoj estis batantaj al la pordo per la piedoj; estis hontinde rompi la pordon de la avino, ĉiuj konis ŝin en la urbo, sed kion fari — la servo.

Surĵetinte sur la ŝultrojn la kaftanon, la rudristo malriglis la pordon, bruligis kenan torĉon en ingo. En la fenestroj estis malklare komenciĝanta tago — pluva, venta.

— Kvitmarkon donu! — per malvarmuma voĉo diris dragono, elpremante akvon el sia longa malseka barbo.

Avino Eŭdoĥa lerte glitis de sur la forno, demandis:

— Ĉu vi freneziĝis? Kian tian kvitmarkon?

Taisja rigardis sen palpebrumi, atendis, kio estos. Rjabov ne haste, inde al sia titolo de cara rudristo, malfermis skatolon,

prenis la paperon. Sed la paperon oni ne legis. Necesis kvitmarko.

— Vestiĝu! — ordonis la dragono kun grizaj lipharoj.

Sur la strato plorĝemis inoj — aliaj dragonoj estis forkondukantaj najbarajn virojn. Avino Eŭdoĥa eklamentis, Taisja per ankoraŭ dormemaj, rondaj okuloj rigardis, kiel vestiĝas Rjabov. Poste ŝi ekkriis, eksidis sur la lito. Kiam Rjabov-on oni elkondukis, ŝi ekkuris post li — sen kapa kaj pieda vesto, surĵetinte sur sin citronkoloran someran robon. La rudristo returnis sin, — tiel bela li vidis ŝin ankoraŭ neniam: la lanugaj harligoj disĵetiĝis, dorma ruĝo — delikata kaj varma — ankoraŭ brulis sur la vangoj, la rozaj lipoj estis duonmalfermitaj, la manojn ŝi alpremis al sia brusto — maldikajn, karesajn liajn manetojn. Kaj pro tio, ke terure kunpremiĝis la koro, kaj pro tio, ke ĉio en li ŝiriĝis renkonten al ŝi, kaj por ne senhonoriĝi antaŭ la dragonoj kaj amaso da viroj, kiuj estis knedantaj per botoj kaj bastoŝuoj koton, — li haltis kaj diris krude:

— Nu, nu! Ne kuru! Iru en la domon, ĉu vi aŭdas?

Taisja haltis, etendis post li la manon, staris iom, faris ankoraŭ paŝon antaŭen kaj rigidiĝis...

Poste, sufokiĝante, ŝi kuris en la domon, vestiĝis dece kaj, kaŝinte la paperon en la sino, ĵetiĝis al la vojevoda domo demandi sinjoron vojevodon.

— Al Vavĉugo li forveturis! — respondis al ŝi kvieta maljunuleto ĉe la pordego.

— Ĉu por longe?

— Kiu scias, sinjorino. Al mi oni ne diras. Forveturis kaj

forveturis.

— Kaj sinjoro Ievlev? Cara tablestro Ievlev, Silvestro Petroviĉ?

— La tablestro estas ĉi tie, kun ŝipistoj, al li ŝipistoj venis. Ja vi iru, ne timu, li malbonon ne faros.

Kaj li mem, kvazaŭ antaŭ bojarino, malfermis antaŭ ŝi malaltan barilpordeton.

En la vestiblo estis neniu, nur du neviditaj maldikmuzelaj ĉashundoj ekĝojis al Taisja, kvazaŭ al konatino. Ŝi preteris la vestiblon, trairis unu halon, frapis al la pordo, trans kiu bruis viraj voĉoj. Neniu respondis al ŝi, ŝi frapis ankoraŭ. Tiam la pordo malfermiĝis, kaj palvizaĝa, nealta homo mire kaj ne severe ekrigardis al Taisja per helaj bluaj okuloj. En lia mano estis fumanta pipo, sur la ŝultroj, super la kaftano, estis sciura peltaĵo. Trans li videblis aliaj homoj, ardezoj kuŝis sur la tablo: inter la ardezoj kaj paperoj staris ludila malgranda ŝipeto.

— Kiun vi bezonas, belulino? — demandis Ievlev.

— Sinjoron Ievlev-on Silvestron Petroviĉ-on! — libere, kvazaŭ ŝi estis en la vojevoda domo ne la unuan fojon, respondis Taisja.

— Ja mi estas Ievlev...

Li eliris al ŝi, frapferminte post si la pordon, trans kiu tuj ree malakorde ekdisputis viraj voĉoj. Taisja ekrigardis al li, mallevis la okulojn, per la solaj lipoj, subite perdante la sentimecon, eldiris:

— Mian edzon oni prenis hodiaŭ al la cara ŝipkonstruejo. Forkondukis. Rjabov li estas, Ivano Sabateiĉ, rudristo. Li havas

dokumenton de Siro Petro Aleksejeviĉ...

Ievlev silentis.

Ŝi rigardis al li maltrankvile, atendante respondon. Finfine li diris firme:

— Kio estas malbona, ke oni lin prenis? Ŝipojn necesas konstrui, kie preni homojn? Oni libervole ne iras, ni pelas per forto.

— Sed ja ne ĉarpentisto li estas, ne kalfatristo, ne forĝisto. Rudristo!

— Kiam venos tempo rudri — ni liberigos, sed nun estas malfrua aŭtuno, en la maron ne necesas iri. Anstataŭ ol sur forno kuŝi, li prefere aferon faru. Li estas viro kun kapo, hakilon en la mano teni povas...

Taisja silentis senmove. Ievlev aldonis pli milde:

— En la cara ŝipkonstruejo, mi pensas, estos ne pli malbone, ol en la monaĥejo. Vidis mi, scias, kiele ili tie vivis...

Malrapide, ne returniĝante, ne riverencinte al Ievlev, ŝi ekiris al la vestiblo. Li ne vokis ŝin, kvankam ŝi sentis — li rigardas al ŝia dorso. Jam en la vestiblo Taisja aŭdis lian voĉon:

— Kaj ne iru plu al iu ajn, neniu helpos...

Poste frapis la pordo.

Ĉe la pordego ŝi sidiĝis sur benkon, senforte faligis la kapon. La pordisto-maljunulo kompatis ŝin, regalis per bona vorto:

— Aĥ, belulino, kial malĝoji? Ne tia estas viro Ivano Sabateiĉ, ke li pereu en la ŝipkonstruejo. Lin la maro ne prenas,

kial do sur seka loko malfeliĉon atendi? Vivu pli kuraĝe, atendu, li konstruos la ŝipojn, revenos...

De la vojevoda biendomo Taisja ekiris al la patro. Ĉe la konata barilpordeto, nigriĝinta pro pluvo, ŝi staris longe, ne aŭdacante eniri, rigardis al pufaj, kvazaŭ fajrantaj grapoloj de sorpoj. Trans la alta barilo furiozis, bojis forgesintaj la mastrinon luphundoj.

Ekvidinte la filinon, Antipo severe ĉirkaŭrigardis ŝin tutan, de la kapo ĝis la botetoj, demandis venene:

— Nu? Ekbezoniĝis tamen la patro?

Taisja trankvile kaj malgaje rigardis al la kolera, rikananta maljunulo.

— Certe, prenis oni vian bravulon? — kriis Antipo. — Prenis, kaj tiam ankaŭ mi iĝis bona? Pagu por mia latrono, por la kanajlo, por la drinkemulo, pagu, paĉjo...

Al Taisja tremeris la vizaĝo, sed ŝi silentis — li furiozu plu. Ŝi staris en sia domo kvazaŭ fremda, rigardis al la propra patro, kvazaŭ vidis lin unuafoje: maljuna iĝis Antipo, flaviĝis, ŝvelis, ĉu drinkas multe? Kaj ŝi rememoris, kiel diris al ŝi homoj, ke Antipo ĉie fanfaronas pri la savo de la caro, montras la caran kaftanon kaj la ĉapon, ordonas regali sin kun respekto.

— Se vi venis, do riverencu! — kriis Antipo. — Kliniĝu, ne staru kiel ŝtipo! Al la piedoj falu, petu kompatige, kun humilo...

— Por kio tiel, paĉjo? — mallaŭte demandis Taisja.

La maljunulo perpleksiĝis por momento, poste kriis ankoraŭ pli kolere:

— Fiulino putra, stultulino, por kiu de mi vi foriris? Por krudlaborulo senpantalona, por dungito, por remisto. Kaj jen vi atingis! Sed mi estas rudristo cara, jen kiu mi estas! Mi la caron mem...

Taisja malrapide returniĝis kaj eliris en la vestiblon. La kapon ŝi tenis alte, en la okuloj ne estis larmoj. Antipo kriadis en la domo, faligis kandelingon, insultis. Ŝi mallaŭte fermis post si la barilpordeton kaj ekiris al Solombalo, al la ŝipkonstruejo, tien, kien oni jam matene forpelis la virojn el la urbo. La mallonga aŭtuna tago jam estis finiĝanta. Nigraj nuboj — flokaj, malaltaj — rampis super la urbo, super la bulbaj kupoloj de la preĝejo de sankta martirino Paraskeva, super alta domo de riĉa popo Kosmo. Estis eta pluvo — malrapida, malvarma. La pafistoj — en ĉapoj, borderitaj per vulpa pelto, en longaj, nigriĝintaj pro humideco kaftanoj, streĉe zonitaj per ŝnuroj — paŝadis al siaj domoj, mornaj, koleraj, — estis honte rigardi en la okulojn de inoj. Ĉe barilpordetoj, ĉe peronoj plorĝemadis maljunulinoj. En ĉevala kolumno — po tri en linio — estis revenantaj la rajdistoj...

Tiun lokon, ĉe kiu antaŭnelonge staris la nederlanda ŝipo, Taisja ne rekonis: sur la bordo iris firma palisaro kun feraj pikiloj supre, super la anguloj altis budoj — por ke tie sidu militistoj, rigardu, kiel oni laboras en la ŝipkonstruejo, kaj ĉu oni ne intencas malbonon: fuĝi, aŭ mortigi la majstron, aŭ fornaĝi laŭ Dvino. Kaj militistoj el germanoj jam sidis en varmaj peltaj surtutoj, en peltaj ĉapoj, kun halebardoj kaj fusiloj, — de tia kien oni povas foriri? Kaj la pordego same estis ne simpla, sed duopa, kovrita per fero. En unu pordegon vi enveturos, la duan oni ne malfermos. La unuan fermos, ĉion

pririgardos — tiam iru pluen.

Ĉe la palisaro iradis inoj kun ŝvelintaj okuloj, lulante infanojn. Geknaboj pli aĝaj tenadis sin je la baskoj, tremadis pro humideco, demandadis:

— Panjo, kaj kie estas nia paĉjo? Panjo, kaj kial paĉjo ne venas?

— Panjo, ĉu paĉjo ankoraŭ el la maro ne eliris?

— Panjo, ĉu tie ĉi oni vendas fiŝon?

Taisja alpremis la vizaĝon al la palisaro, sed neniun ekvidis, nur traboj kuŝas kaj iuj du fremdlandanoj pasumas, ridegas inter si. Ŝi staris longe, ĝis la nokto, nenion esperante, nenion atendante. Kaj ĉiam al la pordego aliradis jen pafistoj, jen dragonoj, jen rajdistoj, jen dogansoldatoj, kondukadis virojn el malproksimaj lokoj — konstrui ŝipojn.

Nokte Taisja venis al avino Eŭdoĥa kaj senvorte kuŝiĝis sur la benkon. La avino kuiris sbitenon, sed ŝi ne trinkis.

Ŝi kuŝis, ne fermante la okulojn, en mallumo kaj aŭskultadis — ĉiam ŝajnis, ke ŝi ion aŭdos...

5. La homoj estas kunpelitaj

Ĉe mateniĝo Silvestro Petroviĉ venis en la Solombalan ŝipkonstruejon kaj ordonis tamburi senprokraste. La tamburo troviĝis ne tuj. Estis mallume, humide, staris tia densa nebulo, ke flamoj de gardistaj lignofajroj ŝajnis palaj kaj tute malgrandaj. La homoj sub tamburado estis leviĝantaj malfacile, ne komprenante — kien ili iru, kion oni deziras de ili. Fremdlandano Schwieber kun knuto en la mano kriadis en nebulo:

— Nu, nu, rapide, nu, nu...

Ievlev per rapidaj paŝoj ĉirkaŭiris la terkabanojn, ĉie je du aŭ tri verŝokoj[74] staris akvo, dormi homoj ĉi tie ne povis, tiun nokton la homoj trasuferis ĉe la ligno, destinita por konstruado de dua hangaro, ĉe la muroj de la ŝipkonstruejo, ĉe longa malalta tenejo, en kiu estis kunmetitaj kanabaj fibroj, peĉo, ŝnuroj, hakiloj, segiloj, najloj...

— Kie estas domoj por la laborantoj? — per stranga voĉo demandis Ievlev la superrigardanton Schwieber-on.

Tiu ektimis tiun strangan voĉon, kaŝis la knuton post la dorson, diris, ke antaŭnelonge sinjoro Baĵenin lignon liveris per multaj flosoj, sed kunmeti ĝin oni ankoraŭ ne sukcesis. Silvestro Petroviĉ per la sama stranga voĉo ordonis sendi kurieron por Jozefo, kaj urĝe.

En la ŝipkonstruejo, ĉirkaŭbarita rezerve ne por unu, ne por du, ne por tri ŝipoj — multe pli, estis brulantaj lignofajroj, kuirata por la laborantoj likva kaĉo. Akvoportistoj estis veturigantaj putan akvon; sub egalmezura «unu-du, ek!» homoj estis malŝarĝantaj lignon de sur flosoj, ĵus venintaj el la segejoj de Vavĉugo. Laboris kune — fiŝisto kun sakristiano, ekspopo kun forĝisto, terkultivisto kun kupristo, bulkisto kun barka rudristo...

La ŝipmajstroj Nikols kaj Jan, sidante en dometo, konstruita por ili en la ŝipkonstruejo, estis trinkantaj kafon kun kremo, kun varmigitaj bulkoj. Majstro Jan nehaste rezonadis, ĵetante rigardojn al Silvestro Petroviĉ per siaj ruzaj okuletoj:

---

74 Verŝoko — malnova rusa mezurunuo, proksimume 4 centimetroj. *(trad.)*

— Dvinano devas havi pri ni, sinjoro, timon. Unu grandan neimageblan timon. Tiam ni havos ŝipojn. La unua tago en la ŝipkonstruejo estas la unua timo. Por tuta ilia vivo — timo. Teruro, jes, jen kiel. Se ili pli laboras — malpli bati. Se ili malpli laboras — pli bati!

Ievlev silentis. Lia koro estis batanta per puŝoj, la vangoj brulis. Li penis ne rigardi al majstro Jan, malrapide maĉanta varmigitan bulketon.

— Eble, vi deziras trinki taseton da kafo? — demandis Nikols.

— Ne, mi ne deziras taseton da kafo! — respondis Ievlev.

— Timo, teruro — estas tre bone! — daŭrigis majstro Jan. — Nur tiel. Alie ne eblas ilin reteni.

— Ho! — diris majstro Nikols. — Tio estas tro! Eĉ dresitan urson ne necesas ĉiam bati. Majstro Jan iom troigas...

Ili fintrinkis sian kafon. Majstro Nikols montris al Ievlev humidan makulon sur la muro, diris kun subrido:

— Tien necesas bona tapiŝo, ĉu vere, sinjoro?

— Se ni ĉi tien venis, tiam por bone, sed ne por malbone! — konfirmis majstro Jan.

— Estas tiel! — diris Ievlev, sed per tia voĉo, ke ambaŭ majstroj vigle ekrigardis al li. — Estas tiel! — ripetis Silvestro Petroviĉ. — Ke estu bone.

— Estu bone! — ekĝojis Jan.

— Bone, bone! — ripetis Nikols.

— Kaj por ke estu bone, — sufokiĝante kaj ne retenante sin

plu, ekparolis Ievlev, — kaj por ke estu bone, vi pri tiu timo, pri kiu vi bonvolis diri, forgesu por ĉiam, ĉar la dvinanoj estas homoj neniom pli malbonaj, kaj eble, eĉ pli bonaj ol vi, sinjoroj ŝipmajstroj. Kaj la unua timo, kaj la unua tago, kaj teruro — mi ĉi vortojn ne aŭdu, ĉar tio revenos al vi de mi per tia timo, ke vi la vojon en la gepatrajn lokojn forgesos, kaj kiel kafon trinki kaj bulkojn manĝi ne rememoros...

Majstro Jan malfermis la buŝon, majstro Nikols salte ekstaris de sur sia loko.

— Ĉu vi komprenis, pri kio mi parolas? — demandis Ievlev.

— Ho jes, certe! — diris Nikols.

— Tempas iri!

Evitante Ievlev-on, ambaŭ majstroj ligis koltukojn sur la kolojn, surmetis peltajn bluzojn, supre — peĉitajn jakojn, poste ĉapetojn kun orelumoj, poste pugnogantojn. Ambaŭ majstroj timis malvarmumon.

En la vestibleto majstro Jan demetis de breto lanternon, lumigis ĝin, malfermis antaŭ Ievlev la pordon.

Nikols eliris al la homoj — rakonti, kia estos ordo en la ŝipkonstruejo, kiel konstrui ŝipojn. Li pensis, ke li bone parolas en la rusa, sed lin preskaŭ neniu komprenis. Kaj eĉ ne aŭskultis. Por kio aŭskulti? Kion eblas ekscii de tiu ĉi mallongkrura, pepanta fremdulo?

Rjabov staris en la lasta vico, ĉe la Dvina bordo mem. Apud li estis kolere subridanta Semisadov — la rudristo, eksa matroso de la cara ŝipo. Pli malproksime staris Demĉjo, apogante sin sur lambastono. Post li estis suspirantaj, aŭskultante majstron Nikols-on, Nilo Longinov, Kopilov. Poste

staris avo Teodoro, Ĥagajo, Jegorĉjo — ĝuste tiu, kiun Rjabov delogis foriri el la monaĥejo por iĝi matroso. Kaj jen kia matroso rezultiĝis Jegorĉjo!

Sub pluvo en obskuro estis kviete plaŭdanta Dvino. Pluvoj, aŭtunaj, malĝojaj, sekvadis seninterrompe. Knaretadis, balanciĝadis malhelaj grandegaĵoj de barkoj. Sible brulis gardaj kaj pobaj lignofajroj, en malforta griza lumo de venanta aŭtuna mateno kune staris Ievlev kaj la du fremdlandaj majstroj. Rjabov rekonis Silvestron Petroviĉ-on laŭ la longa mantelo. Tiu estis staranta dorskurbe, entirinte la kapon en la ŝultrojn. Li rekonis kaj decidis: «Mi aliros al li jam hodiaŭ! Diros pri la cara papero! Ĉu mi pereu ĉi tie?»

Poste, kiam tute mateniĝis, venis mallonga aŭtuna tago kaj humida vento dispelis la nebulon, nelonge antaŭ la soleno de ekkonstruo de la ŝipo, Rjabov aliris al Silvestro Petroviĉ kaj miris, kiel dum tiu ĉi tempo, dum tiuj tagoj, kiuj pasis post la forveturo de Petro Aleksejeviĉ, maldikiĝis Ievlev, kiel griziĝis lia vizaĝo, kiel malgaje kaj lace rigardas liaj ankoraŭ junaj okuloj.

— Nu, kion bonan vi diros? — demandis Silvestro Petroviĉ, salutante.

Rjabov subridis:

— Ĉu bonan? Ne aŭdeblas nun io bona. Jen — oni alkondukis, devigis konstrui ŝipojn.

Silvestro Petroviĉ elprenis el la poŝo la pipon, la tabaksaketon, prepariĝis aŭskulti. Rjabov nenion plu diris, ne trovis, kiel fari la konversacion.

— Plu diru! Kial vi eksilentis?

— Rudristo mi estas. Ne ĉarpentisto.

— Tion mi aŭdis. Edzino via kuris al mi, petis liberigi Ivanon Sabateiĉ-on. Sed tion mi ne rajtas. Ŝipojn necesas konstrui, tempas, ke estu floto...

Rjabov ruĝiĝis, forturniĝis flanken.

— Unu estas kupristo, alia kvasisto, tria ekspopo, — ekscitiĝante, laŭte diris Ievlev. — Ĉiu havas sian orfecon, malfeliĉon, mizeron. Kie do ŝipfaristojn preni, de kie ili aperu? Ivano Kononoviĉ kaj Timoteo Koĉnev en akra ofendiĝo pri la fremdulo forveturis de ĉi tie! Aliaj entute fuĝis. Kion fari? Kiel konstrui? Aŭ ĉio ĉi estas galimatio, eble vere Rusio ŝipojn ne bezonas? Diru, kial vi silentas?

— Ŝipoj ja necesas! — diris la rudristo. — En tio ne eblas kontraŭi...

— Ne eblas kontraŭi? Sed vin mi liberigu? Lin, — li kapmontris al preteriranta lardofandisto, — ĉu lin mi same liberigu? Ne sian aferon li faras? Sed ĉu vi mokas min? Ĉu mi mem mian aferon faras? Mi, frato, kiam estis adoleskanto, peladis kolombojn, aritmetikon ĝis dek sep jaroj ne lernis, ĉu estas mia afero la ŝipkonstruado? Vi mem vidis, kiom mi konas la maron. Kiam mi ĉi tien kun la cara ŝiptrajno venis, estis rido kaj ploro, vi mem pri ni ridis. Tamen jen mi ĉi tie estas, en la ŝipkonstruejo. Estos la floto, rudristo, — ĉu vi komprenis? Estos en Rusio la ŝipa arto! Ĉu vi memorfiksis? Kaj plu ni pri tio ne parolu, mankas tempo, kaj ne havas sencon!

Li returniĝis, ekiris al la domo, kie estis atendanta lin timigita Jozefo Baĵenin.

Demetinte la mantelon, Silvestro Petroviĉ viŝis la humidan

vizaĝon per la manoj, eksidis sur benkon. Baĵenin estis sekvanta lin per rigardo.

— Jozefo Matejeviĉ... — komencis Ievlev.

— Ĉi tie mi estas, Silvestro Petroviĉ!

— Mi vidas, ke ĉi tie. La domon vi ne konstruis. La laborantoj...

— Silvestro Petroviĉ...

Ievlev terure frapis la tablon per la pugno, kriis per furioza, rompiĝanta voĉo:

— Mi pendumos vin, latronon, ŝteliston, la kapon forhakos, sur palison metos! Por vi profitoj viaj pli karaj estas ol la afero cara! Se vi ekokupiĝis — mortu, sed faru! Silentu, kiam mi kun vi parolas, aŭskultu min...

Poste Baĵenin estis parolanta per larma ruza voĉo:

— Ne povas mi disŝiriĝi, Silvestro Petroviĉ, vi ĉi tie per pugno frapas, la vojevodo en mia ŝipkonstruejo stamfas, minacas. Mi ja estas unu!

— Se vi kontraktis — faru! — malmilde respondis Ievlev. — Se vi ne faros — mi vin dispremos. Kial ŝipa ligno ĝis nun ne estas alveturigita? Kial vi tiom longe tiujn larikojn segas? Ĉu al fremdlandanoj vi vendis la tabulojn? Kun kiu vi komercas — kun ni aŭ kun transmaraj negocistoj? Hodiaŭ mi rigardis kanabfibron — por kio tia taŭgas? Forveturigu ĝin reen, liveru novan! Kiom da trunkoj estas en via kverka arbareto?.. Kial vi silentas? Ĉu mono al vi pro la arbareto estis donita? Kie estas ĝia listo?

Baĵenin turnadis la kapon, viŝadis ŝviton, pririgardadis ŝipan

modelon, turnadis en la manoj cirkelojn, rektilojn, specimenojn de ŝnuroj, de veltolo, de stupo, flaradis peĉon, premadis ĝin per la fingroj. Ievlev plu paroladis. Al Baĵenin subite venis angoro — li eĉ fuĝu for de ambaŭ ŝipkonstruejoj, kaj de la Solombala, kaj de la propra. Penetris, kaptis, kvazaŭ per tenajloj, la caraj servantoj. Kion fari? Eblas perei pro nenio!

Al Baĵenin venis por ien voki pafistoj — du dekestroj kaj duoncentestro. Ievlev demandis ilin:

— Ĉu vi alveturigis?

— Ĉi tie.

— Ĉu ambaŭ?

— Ambaŭ.

— Ili venu.

Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ eniris silente, riverencis, eksidis sen permeso. Ambaŭ estis en marhundaj kaftanoj, kun dorsosakoj, ambaŭ rigardis trankvile, pretaj al ĉio plej malbona. Pafistoj kun muskedoj, lacaj, staris ĉe la pordo. Ievlev forpermesis la soldatojn, diris kun suspiro:

— Pardonu, Ivano Kononoviĉ, kaj vi, Timoteo, same pardonu, ke mi kontraŭvole pelis vin en la ŝipkonstruejon. Laŭvole vi ja ne venus. Sed la ŝipojn konstrui necesas.

La majstroj silentis.

— Fremdlandanoj Nikols kaj Jan estas viroj ne stultaj, la ŝipan proporcion scias, sed ne interesas ilin niaj ŝipoj: nenie doloros, se ili malbone faros. Rusan majstron ni bezonas, propran, por ke la laboro bone iru.

Ivano Kononoviĉ kaj Timoteo interrigardis.

— Hodiaŭ ni komencas konstrui fregaton, — daŭrigis Ievlev, — jam popo kun klerikaro venis — por konsekri. Estus bone, ke ĝuste vi, Ivano Kononoviĉ, komencu tiun fregaton.

Ivano Kononoviĉ dense tusis, elprenis grandan tukon, viŝis la vizaĝon.

— Kaj sinjoro Koĉnev iros en Vavĉugon al Baĵenin, kun majstro Jan laboros. Vi ĉi tie — kun Nikols, Timoteo — en Vavĉugo kun Jan. Tiel bone iros ĉe ni la laboro.

— Do, ni estas sub ili? — singarde demandis Ivano Kononoviĉ.

— Kaj tion ĉi vi kiel volas, mem komprenu! — kun ĉagreno diris Silvestro Petroviĉ. — Vi sub ili, ili sub vi, diablo...

Li kraĉis, ekstaris de la benko, trairis la ĉambron.

— La aferon necesas fari, jen kio!

Kaj li metis sur la grandan glatan tablon desegnaĵon de la fregato, faritan de la fremdlandaj majstroj. Ivano Kononoviĉ elprenis el leda saketo okulvitrojn, viŝis ilin, surmetis sur la nazon, fiksrigardis. Lia vizaĝo iĝis bonkora, atenta. Poste li ŝmacis, prenis cirkelon, komencis mezuri. Timoteo estis rigardanta al la desegnaĵo el post lia dorso.

— Nu? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— La pobo ĉu ne tro mallarĝas? — demandis responde Koĉnev.

— Tion vi pli bone vidas...

La majstroj ankoraŭ interkonsiliĝis. Ievlev sendis por Nikols kaj Jan. Tiuj venis tuj. Ievlev al ili diris:

— Jen niaj rusiaj ŝipaj konstruantoj. Ili dubas — ĉu ne tro mallarĝa estas la pobo de la fregato. Konversaciu!

Sed konversacii ili ne sukcesis — por la komenco de la fregato venis Atanazio mem. En la ŝipkonstruejo duan fojon ekbatis la tamburo, la laboroj ĉesis, la homoj ekiris al la nova hangaro, ĉarpentita el dikaj traboj, apogiĝantaj sur fortaj pilieroj. Sur dek du fostoj ĉarpentistoj estis ankoraŭ finfarantaj la ŝedon. Laborojn necesos fari en vintra frosto, Ievlev decidis kovri poste la hangaron per tabuloj...

Ivano Kononoviĉ suriris la podion, rigardis, ĉu firmas la bazo de la hangaro, deflanke, duonferminte la okulojn, kontrolis angulon de deklivo al la rivero. La ĉefepiskopo de malproksime demandis lin:

— Nu, kion vi, sorĉisto, sorĉas? Ne estas varme — atendi vin! Blovas!

La majstro, ne returniĝante, respondis:

— Sed vi ne knaru, maljunulo! Mi la aferon faras!

Atanazio koleriĝis:

— Kun kiu vi arogantas, stultulo! Returniĝu!

Ivano Kononoviĉ returniĝis, sed ne konfuziĝis:

— Pardonu, patro! Sed ja vi mem skoldos, se ni la ŝipon malbone konstruos!

La popolo ĉirkaŭe estis subridanta, atendis pacience. De unu homo al alia flugis: «Konstruos Ivano Kononoviĉ, vidu, li venis el sia Lodjmo. La fremdlandanoj nun iĝos pli kvietaj. Li la aferon scias!»

En krepusko oni komencis la ceremonion. Laŭlonge de

fortika, glate tajlita trabo, kiu kuŝis sur tabula podio — ĉe la kilo de la estonta ŝipo, ekstaris apude Ivano Kononoviĉ, Ievlev, majstro Nikols, Timoteo Koĉnev, majstro Jan, dekestro de ĉarpentistoj Rublev, popo Simeono. Demĉjo Goroĵanin, kontenta, ke li ricevis tian honoron, metis sur la podion puran novan lignan sitelon kun peĉo, saman novan keston kun marteloj kaj najloj. Nemalproksime de la ŝipkonstruejo, en la preĝejeto ekbatis sonoriloj. Atanazio kun popoj kaj klerikaro, kun templaj kantoroj kaj kantoroj-volontuloj ekiris ĉirkaŭ la kilo. Kiam la procesio atingis Ivanon Kononoviĉ-on, li, subite iĝinte blanka, kiel tolo, severe kunpreminte la lipojn, trempis penikon en la sitelo kun peĉo kaj peneme, lerte kaj rapide ŝmiris parton de la trabo. Blua fumeto el la incensilo kovris la majstron, li iĝis kvazaŭ naĝanta en nubo. Demĉjo kaptis el lia mano la penikon, donis martelon. Ivano Kononoviĉ per mallongaj kaj precizaj batoj enmetis najlon en la trabon ĝis la kapo mem. La samon faris ankaŭ Silvestro Petroviĉ. La peniko kaj la martelo iris pluen — de homo al homo...

Rjabov staris nemalproksime en la homamaso, rigardis al la ceremonio, pensis: «Nu, do, eble vere estos utilo. Ni multon provis, provos ankaŭ tion ĉi. Ni vivos — ni vidos!»

6. Pli gaja ŝajne!

Ĉe glaciiĝo de la Dvina buŝo oni forigis la gardistan budon, Atanazio Petroviĉ kun siaj doganistoj revenis en la doganan domon. Ĉi tie, en lumo de mallonga tago, li eltranĉadis tabulojn por Taisja, por ke ŝi povu nutri sin kaj portadi al sia malfeliĉa rudristo, trans la murojn de la ŝipkonstruejo, panon

kaj bakitan fiŝon. La tabuloj rezultis bonegaj por ĉies miro. Taisja ekĝojis, ŝi mem ankoraŭ orbrodadis ornamojn, prenante ilin de herboj kaj folioj, de piceaj branĉoj, kaj iam eĉ simple elpensadis mem. Ŝi brodadis, kiel ĉe Peĉoro kaj Mezeno — pugnogantojn kaj ŝtrumpojn, kiel ĉe Pinego — zonetojn, kiel en Krasnoborsko — lanajn ŝtofzonojn.

Fremdlandaj negocistoj laŭdadis la manfaraĵojn, balancadis la kapojn, sed pagadis malmulte. Tamen Taisja kun la fiŝista avino Eŭdoĥa vivis ne malsate, kaj ankaŭ orfoj ĉe ili nutriĝis...

Iam vizitadis ambaŭ virinojn Krikov kaj tuj trovadis por si aferon: jen ŝmiri per argilo la fornon, jen ripari plafonan ĉeftrabon, jen — la perono rompiĝis! Li fendadis dikajn rezinriĉajn arbostumpojn — la vintro estis malvarma, seka brulligno ĉiam necesas. Fininte la laboron, li revenadis en la domon, oni lin regaladis per kvaso, brasika aŭ fiŝa supo. Li ĝentile rifuzadis...

Dum lia ĉeesto foje venis homo el Lodjmo — alportis al la ŝipmajstroj en la malliberejon manĝon. Eksciinte, ke Ivano Kononoviĉ kaj Koĉnev vivas en libero, li miris, ne kredis. Vespere ili renkontiĝis, longe paroladis, kiel konstruiĝas la fregato, kiel oni faras la duan kaj la trian hangarojn. Al Ivano Kononoviĉ pro la konversacio ruĝiĝis la vizaĝo, estis videble, ke li estas kontenta. Timoteo plie silentis, sed al vortoj de la maljuna majstro kapjesadis.

— Kaj la fremdlandanoj kiele? — demandis Krikov.

— Silvestro Petroviĉ ilin tenas en brido.

— Kaj ĉu ili obeas?

— Ĉe li obeas, sen li kaj sen Teodoro Matejeviĉ multe

arogantas...

— Kaj ĉu la aferon ili scias?

— La aferon ili scias, ili vidis multajn ŝipojn dum sia vivo...

Taisja mallaŭte demandis:

— La vivo ja tie ĉu estas malfacila, Ivano Kononoviĉ?

La majstro respondis ne tuj:

— Sed kie estas facila vivo, Taisja Antipovna? Ĉie estas malfacile, sed ĉi tie ni almenaŭ la aferon faras...

Kiam la majstroj leviĝis por foriri, Taisja, kiel ĉiam, ligis paketon por Rjabov. Atanazio Petroviĉ rigardis al ŝi, pensis kun malgajo: donis Dio al la rudristo amikinon por la tuta vivo. Kun tia nenio estas timinda.

Krikov mem vivis sole, Silentulon oni prenis en la ŝipkonstruejon en Solombalo, venadis nur Forĝisto, sed kun li estis enue — li paroladis nur pri la lasta juĝo kaj pri la veno de Antikristo. Pri Vataĵnikov kaj Gridnev estis onidiro, ke ili estas en la ŝipkonstruejo en Vavĉugo, almenaŭ estis bone, ke oni ne ligis al ili la manojn kaj ne sendis en Moskvon, kaj en Kromon, kaj en Rjazanon, — tie bojaroj ilin mortekzekutus...

Krikov vivis tiel: matenas, vesperas, kaj tago malaperas. Nokte en la varme hejtita dogana domo li ne povis ekdormi — longe pensadis. Pensoj kuradis vice — negajaj, pezaj, maltrankvilaj. Kaj se antaŭe, en la pasintaj jaroj, Atanazio Petroviĉ atendis de la estonteco nur bonon, do nun pri bono li eĉ ne revis. Atendis nur malbonon...

Tiel li travivis duonon de vintro.

Foje en dimanĉo li leviĝis antaŭ mateniĝo, lavis sin en la

vestiblo de la dogana domo per glacia akvo, kombis la malmolajn harojn per ebura kombilo, eltranĉita de li mem, eliris en la korton, kie kuŝis apenaŭ komencantaj rozkoloriĝi neĝoj. Pura frosta aero batis en la bruston, rememoriĝis tuj ĉio bona, kio okazadis en la lasta tempo: kaj la vortoj de la ĉefepiskopo tiam, en Ĥolmogoro, kaj la simpatio de Silvestro Petroviĉ, kaj lia promeso ne forgesi la malfeliĉon de la malpromociita leŭtenanto, kaj kaporalo Kostjukov, kiu mem kuris kun Rjabov al Ievlev... Larmoj subite eliris el la okuloj pro ĝojo, ke li vivas, ke li spiras, ke li vidas, kiel estingiĝas en la ĉielo noktaj steloj, kiel estiĝas mateno.

— Ne gravas, — mallaŭte diris la eksleŭtenanto, — ne gravas, ni ankoraŭ vivos, ankoraŭ estos por ni ankaŭ bono. Ĉio ankoraŭ estos, ĉio...

Li ekiris sur la neĝo, retroklininte la kapon, rigardante en la ĉielon: ĝi jam heliĝis, la steloj flagris timide, kvazaŭ degelante. Voke, laŭte, insiste henis en la stalo ĉevalino Kareso. Krikov eniris en la varman stalfakon, sur la polmo etendis al Kareso pecon da forte salita pano. Kareso prenis per molaj lipoj, ŝiaj oreloj ekmoviĝis. Atanazio Petroviĉ frapetis ŝian kolon, luktis iomete kun la doganeja ĉevalisto, faligis lin sur la pajlon, demandis:

— Ĉu morton?

— Vivon! — petis per kompatiga voĉo la grizbarba, fortika, kiel urso, avo Kosmo.

— Sed, eble, morton?

— Vivon, vivon, Atanazio Petroviĉ!

— Tiele!

Poste avo Kosmo oĥadis, ŝajnigante sin kripligita, turnadis la kapon:

— Kian fortegon vi havas, Ataĉjo, aĥ-aĥ! Kun tia fortego vi povus kontraŭ urso iri...

— Ja ĝuste vi por mi estas urso, avo Kosmo...

Reveninte en la ankoraŭ dormantan pro dimanĉo doganan domon, li vekis Eŭdokimon Prokopjev-on, eksidis apud li sur benkon, demandis:

— Kiel ni hodiaŭ vivos, Eŭdokimo Aksenoviĉ?

Prokopjev ekrigardis al Krikov per dormema rigardo, dolĉe oscedis, tiris sin kaj diris:

— Espereble, nian tagon ni ĝisvivos. Vi, mi vidas, hodiaŭ pli gaja iĝis?

— Pli gaja ŝajne! — respondis Krikov.

7. Tago post tago

Ĝis la tago de Bazilo Sunkreska[75] multaj homoj en la ŝipkonstruejo en Solombalo ekmalsanis je skorbuto. Kuracisto-fremdlandano, en mallonga nigra leda kaftano, aliradis malsanulon, rigardadis la gingivojn, dolore kuspadis la palpebrojn, fleksadis la brakon aŭ la kruron, poste per sia longa fingro skribadis en la aero krucon. La superrigardanto germano

75 En la rusa nordo oni nomadis tiel la 1-an de januaro laŭ la Julia kalendaro («sunkreska» signifas, ke post tiu tago la suno «kreskas», t. e. lumas pli longe). Notu, ke tio ne estis la tago de Novjaro en la tempo de la romano, ĉar en Rusio jaro komenciĝadis la 1-an de septembro ĝis la jaro 1699, kiam Petro enkondukis Novjaron ekde la 1-a de januaro kaj kalkuladon de jaroj ekde la Kristnasko, sed ne ekde la «mondokreo», kiel antaŭe. *(trad.)*

Schwieber, lokita en la ŝipkonstruejon fare de kolonelo Snivin, demandadis, per kio helpi, — la kuracisto nur levadis la ŝultrojn.

Skorbuto falĉadis homon post homo.

Kaj kial do skorbuto ne triumfu en la ŝipkonstruejo?

Matene por ĉiuj estis kuirata amelsupaĉo el hordea faruno, meze de tago en la ŝipkonstruejo oni sonorigadis batilon, alportadis lignajn tinojn kun kuirita rapo kun kvaso kaj malto. Nenion plian oni manĝigadis. Pano estis malseka, kruda, kun ŝelo kaj ligneroj. En Kristnasko oni donis pistitan farunon kun fetora foka graso. Pro ĝi multaj laborantoj ŝvelis, avo Teodoro en la sama vespero mortis. Mortis kvieta kupristo el la Trabata strato, oni sepultis servutulon Jeremion.

En nokta mallumo, sub fajfo de neĝblovo, kiam pro kolera frosto krakadis anguloj en la kabano de la laborantoj, maljunuloj, alpelitaj el malproksimaj vilaĝoj, nelaŭte kantis:

Aŭdu, patrino, amaran ploron
Kaj plendan voĉon feblan,
Vidu plorindan aspekton mian,
Prenu min baldaŭ en ĉerkon vian,
Ne povas mi plu lamenti,
Deziras malamikoj min oferi,
Malfermu ĉerkon mian, panjo,
Akceptu al vi vian idon...

Ili kantadis sopirajn pridiajn malnovaĵojn: la sonĝon de Di-patrino, la suferon de Kristo. Pleje plaĉis aŭskulti la suferojn de Jozefo la Bela, «kiam vendis la fratoj lin en Egipton...»

Demĉjo tute maldikiĝis, en liajn enfalintajn nigrajn okulojn

estis timinde kaj malĝoje rigardi. Semisadov trinkigadis la lamulon per konifera tizano, Rjabov donadis al li preskaŭ ĉion, kion alportadis Taisja. Metrio estis velkanta kun okulfrapa rapideco. Ne por liaj fortoj estis laboro kun hakilo, ne povis li turni pezajn glaciiĝintajn trabojn...

Post la Kristnasko malsaniĝis Semisadov. Rjabov alsidiĝis al li, karesis la ŝultron, diris morne:

— Ekstaru, frato. Rezistu. Vi mem scias, kiel kontraŭ ĝi batali, kontraŭ skorbuto. Iru per la piedoj...

Semisadov ankoraŭfoje leviĝis, eliris al frosto, prenis sur la polmon neĝon, lekis, penis ĉarpenti trabon, sed fortoj mankis; malforte, konfuze ridetante, li revenis en la kabanon. Sabate venis Des-Fonteines, rigardis al Semisadov la gingivojn, fleksis la brakon, diris klare:

— Eblas labori. Kuŝi ankoraŭ estas frue. Jes, labori!

Semisadov penis leviĝi — ne sukcesis. Superrigardanto Schwieber atendis, ludante per vipo. Poste li demandis:

— Ĉu vi scias, kiel necesas helpi ĉevalon, kiam ĝi falis?

Semisadov ne respondis. Li kuŝis ĉe la forno — granda, magra, kun tristo rigardis al la fremdlandano, — sciis, ke tiu batos per la knuto. Schwieber tiris la knuton post la dorso, svingis, por komenco batis al la planko. Ĝuste tiutempe Rjabov, rulante trabon, falis en glacitruon kaj estis iranta en la kabanon por ŝanĝi sian veston. Al li renkonten kuris Demĉjo kun sciigo — Semisadov-on la fremdlandano Schwieber intencas ĝismorte bati.

La rudristo ŝiris la pordon.

Schwieber retrorigardis kaj prokrastis bati.

— Lasu la knuton ja! — diris la rudristo.

La superrigardanto oblikve ekrigardis al la rudristo, aŭskultis, ĉu iu venas, demandis:

— Ĉu li ekstaros mem?

— Ekstaros! — diris Rjabov.

— Vi tiel diras, ke mi povas kredi?

— Povas!

Schwieber foriris.

Rjabov surmetis sekajn vestaĵojn, forigis glacierojn el la barbo, eksidis sur la plankon apud Semisadov.

— Ne ekstaros mi, ŝajne! — diris Semisadov. — Malfortiĝis mi troe!

Sed Rjabov devigis lin ekstari kaj eliri al laboro ankoraŭfoje, infuzis por li koniferon, ordonis trinki kiom eblas. Semisadov ekfartis iom pli bone. Sed ĉu por longe? Necesis foriri, necesis fuĝi, sed kiel — neniu sciis.

Dum kelkaj tagoj Rjabov vaporumadis en argila poto koniferon, trinkigadis per la tizano Semisadov-on, senhaste, garde elirigadis lin al freŝa aero, al frosto, manĝigadis al li ĉion, kion transdonadis Taisja. Semisadov iomete restariĝis.

Dum longaj noktoj ili flustre konstruadis nerealigeblajn planojn de fuĝoj, poste pensadis: kiel fari subfoson, se la tero glaciiĝis je arŝino? Per kio fosi, se la instrumentaron en vesperruĝo forprenas gardistoj? Kaj poste kien iri, kiel transiri la muron de la ŝipkonstruejo? Ĉu eblas foriri ne rimarkite de

militistoj, gardantaj la caran konstruejon?

Ankoraŭ unu zorgon krom la malsana Semisadov, krom Demĉjo, havis Rjabov: la samojedan maljunuleton Pajga-n. Iam okazis, ke la samojedo, laborante en konstruado de ŝipo, mallerte etendis hakilon al majstro Nikols. Tiu, ne returniĝante, piedbatis starantan sur ŝtuparo Pajga-n, la maljunulo perdis ekvilibron kaj nevole kaptis la piedon de la majstro. Ambaŭ falis kune. Superrigardanto Schwieber alkuris al la krio de Nikols, al lia blasfemado. La maljuna Pajga estis kvarpiede forrampanta flanken, kaŝante la kapon, por ke oni ne mortigu lin per bato al la kapo. Ĝuste tiun ĉi maljunan, kalviĝantan, en tufoj de maldensaj haroj kapon preskaŭ surtretis la rudristo, aperinta el post traboj kun tabuloj sur la ŝultroj.

La superrigardanto jam estis serĉanta per rigardo, kiun knuti unue. Jam oni kondukis Nikols-on fomenti la difektitan kruron. Jam la knuto ekfajfis super la maljuna Pajga, por ke per la unua bato dishaki lian kadukan peltan bluzon, kaj per la dua — deŝiri la haŭton de sur la maljunaj ripoj. Jam oĥis la ŝipkonstruaj laborantoj ĉe vido de la komenciĝinta puno. Sed la puno ne okazis. Rjabov kun tondro ĵetis la tabulojn sub la piedojn de Schwieber, rektigis la potencajn ŝultrojn, paŝis antaŭen, ŝirminte per si la maljunulon. Kaj tuj eksentis — li ne estas sola, apude estis intermite spiranta ankoraŭ iu homo, — kiu, li ne rimarkis.

— Ne batu! — ordonis Rjabov.

La superrigardanto tenis la knuton post la dorso, prokrastante la baton. Kaj kiun bati — ĉu Rjabov-on aŭ lian najbaron, kiu staris, elmetinte antaŭen la nigran krispan barbon kaj bruligante la superrigardanton per satana rigardo?

Schwieber ankoraŭ pli forŝovis la knuton — ju pli forŝovi, des pli drasta estos la bato.

— Al vi mi diras — ne batu! — ripetis Rjabov. — Kiun vi bati volas? Ĉu infanon etan? Kion li scias? Nur boacojn kaj tundron! Ja la maljunulo mem falis, mem albatiĝis, pro kio knuti?

Schwieber decidis, ke preferinde li finu la aferon pace.

— Ĉu li falis? — demandis li afereme.

— Li falis la unua! — konfirmis Rjabov.

— Ĉu vi diras puran veron?

La rudristo kapjesis.

Schwieber ĉirkaŭrigardis — ĉu ridas iu. Neniu ridis. Tiam Schwieber diris:

— Mi estas danka al vi, ke vi helpis al mi eviti grandan pekon! Mi forte dankas vin. Puni sen kulpo estas peko...

La amaso de laborantoj estis morne silentanta.

Schwieber movis la ŝultron, svingis la knuton super la kapoj:

— Labori! Nu! La maljunulo ripozu hodiaŭ, morgaŭ kaj ankoraŭ morgaŭ. Sed ne, al li sufiĉas du tagoj...

Kaj Schwieber foriris. Rjabov turniĝis al sia najbaro, demandis:

— Kial vi enmiksiĝis en la aferon? Li povis simple mortigi vin per sia knuto.

— Kaj ankaŭ vin li povis mortigi! — respondis Silentulo.

Rjabov subridis.

— Min estas malfacile mortigi! Mi jen kia naskiĝis...

Silentulo respondis simple:

— Vi estas bona, sed ankaŭ mi ne estas malforta. Miaj muskoloj estas kvazaŭ feraj. Provu — malfleksu...

Kaj li submetis sian brakon, fleksitan en la kubuto.

Rjabov deziris malfleksi tuj — ne sukcesis. Li devis iom klopodi, ĝis malfleksis. La maljuna Pajga derampis flanken, observis kun intereso, kiel mezuras siajn fortojn la Granda Ivano kaj la nigra barbohava Silentulo. Ekde tiu tempo la maljuna Pajga kiel ombro sekvadis Rjabov-on kaj eĉ dormi transiris en tiun kabanon, kie dormis la rudristo. Ĉi tie li instalis sin ĉe la pordo, kie sentiĝis frosto — en la domo mem al li estis sufoke. Ĉi tie li manĝadis sian viandrabotaĵon (Rjabov akiradis por la maljunulo krudan viandon — ĝin sendadis Taisja, li rabotadis ĝin kaj manĝadis de sur la tranĉilo). Ĉi tie li kantadis siajn kantojn, ferminte la okulojn kaj balanciĝante, kvazaŭ en boacosledo, aŭ subite komencadis rakonti pri majoro James, kiel tiu venis kaj faris grandan ruinigon al la tuta nomadejo. La rusoj ne komprenadis, sed aŭskultadis atente, balancadis la kapojn, ofendiĝadis kun la maljuna Pajga...

— Peze, videble, sur la maljunulon suferoj falis! Jen, li ĉion memoras...

— Rigardu, li ploras! Ofendis oni lin, evidente...

— Ne malhelpu, li plu rakontu...

— Rakontu, avĉjo, rakontu... Al vi estos pli facile...

Pajga rakontadis pri majoro James, pri tio, kiel restis tie,

malproksime, tuta lia familio — infanoj, nepoj, kiel oni kondukis lin en la urbon — ligitan per ŝnuro al selo. La laborantoj divenadis:

— Jen, kion ili faris! Maŝon sur la gorĝon — kaj kondukis!

— Kaj ĉu vin oni per kukoj logis? Aŭ vi mem venis?

— Nu, lin oni en kaleŝo alveturigis...

Laŭta ridego aŭdiĝis en la kabano:

— En kaleŝo! Ho-ho!..

Iufoje maljunulo Pajga rakontadis, kiel li ĉasadis en la tundro, kiel kaptadis fiŝon, kiel edzigis filon, entombigis la patron. Rakontadis pri sorĉisto-resanigisto, kiel tiu kuracas malsanojn. Li mem montris la sorĉiston, kiel tiu saltas kaj ekzorcas. La laborantoj ridis:

— Jen, monstro!

— Ĉiu homo sian popon bezonas. Kaj jen mi al li nian popon montros — kion li diros!

— Vi prefere pli mallaŭte!

— Kial mallaŭte! Nia popaĉo, verŝajne, sobra eĉ ne naskiĝis.

Silentulo, estinta en multaj lokoj, rakontis:

— Do kio? Estas popolo kiel popolo. Honesta, ĉiam sincera. Mi loĝis ĉe ili, ne eblas ofendiĝi. Kvieta popolo. Entombigas ili en sia maniero — mortintojn preparas por longa vojo: en ĉumo, en ilia domo, la stangojn rompas, metas en la ĉerkon al la mortinto kuleron, tason, ĉion, kio necesos en tiu vojo, ankaŭ lian pelbastonon, por ke estu per kio en tiu lando boacojn peli...

Ĉu mi ĝuste diras, patro?

Pajga kapjesadis per la maljuna kapo, kvazaŭ komprenante, kion diras Silentulo, ridetadis, malrapide kuŝiĝadis por dormo apud la pordo.

Iam Rjabov ekmalsanis, malvarmumis — doloris la ŝultroj kaj la kruroj, en la kapo kvazaŭ pafadis kanono. Tiam nokte Rjabov rimarkis: la maljuna Pajga elprenas el la sino lignan bloketon, ion strangan faras kun ĝi. Li ekstaris, fiksrigardis, komprenis: Pajga estis manĝiganta sian dion per kaĉo, por ke tiu savu la rudriston el la febro.

— Ĉiu havas sian dion! Por samojedo dio estas ligna bloketo, — diris Rjabov al Demĉjo. — Utilo ne videblas, sed li esperas...

En februaro ili ankoraŭ entombigis multajn. La vintro estis severa, frostoj ne foriradis. En longaj noktoj sur la tuta ĉielo ludadis nordlumo — en nigra ĉerpilo iradis oraj glavoj, lancoj, sagoj. Maljunuloj, ŝirante animojn, ĉiam kantadis pri morto, pri ĉerko, pri polvo. Unu — flava, velkiĝinta — recitadis en mallumo de longa nokto:

«Vivo diras: — Kio estas ci, ho terura miraklo? La ostoj estas nudaj, aspekto cia kaj voĉo cia estas kiel parolo akva. Kion signas tintado de cia falĉilo? Rakontu al mi! Morto diras responde: — Mi estas por infanoj konsolo, por maljunuloj ripozo, por sklavoj libero, por ŝuldantoj rabato, por junuloj eterna trankvilo. Vivo diras: — Kial ci staras sur vojo mia kaj murmuras malklare? Iru for de ni tien kaj tien, Morto, en malhelajn arbarojn, en vastajn kampojn, trans bluajn marojn; kaj mi cin ne timas...»

Laborantoj, aŭskultante la maljunulon, subridadis. Tiuj, kiuj estis pli maljunaj — grumbladis:

— Kion ridindan vi trovis?

— Kial vi, senhontuloj, ridaĉas?

La maljunulo, atendinte, plu recitadis parkere:

«Morto diras: — Ho juna, verda, ho Vivo, ho belo, por mia koro estu ĝuo. Kaj amo mia pli rapidas ol rapida rivero, pli akras ol akra tranĉilo...»

El mallumo aŭdiĝis mokaj sentimaj vortoj:

— Ĝi ja amos!

— Ruza! Al ĝi nur cedu!

«Vivo tamen diras, — ree monotone diradis la maljunulo el sia angulo: — Ci estas falĉisto. Falĉu ciajn kampojn, por rikolto maturiĝantajn. Mi estas juna, mi estas frukto nematura, ĉi tie por ci ne estas afero...»

— Li diras, iru for de ĉi tie!

— Ni, diras, sen vi sukcesos!

«Morto do diras: — Ho Vivo! Ĉu aŭdas ci sonon, la sonon de tendeno sur pafarko mia? Kaj jen el akraj la plej akra morta sago por ci destinita...»

Tiel, flankalflanke kun morto iuj ĝisvivis la plej karan por la pomoroj tempon — la tagon de Eŭdoksia[76]. Steloj brulis hele kaj klare, ludis ŝanĝbrile, flagris malalte super la maro mem. Ĝis tiu ĉi tempo vintro kvietiĝas, necesas pensi pri estonta

76 Tago de sankta Eŭdoksia Iliopola (aŭ Eŭdoksia Printempa), la 1-a de marto laŭ la Julia kalendaro, la komenco de printempo. *(trad.)*

fiŝkaptado. Oni rememoris: en la tago de Bapto de Jesuo[77] dum la tuta tago blovis forta norda vento — tio estas antaŭsigno de granda fiŝkaptado.

En tiu ĉi nokto, unuafoje dum la tuta tempo de la ŝipkonstruaj laboroj, ekkantis Paŭĉjo Silentulo. Li sidis, apogiĝinte al la muro, frapetadis al la benko per la malpura polmo, kantis ankoraŭ de neniu aŭditan kanton, ne similan al tio, kion kantadis aliaj laborantoj.

La kanto estis malrapida. Silentulo kantis ĝin kun minaco en la voĉo, nehaste ĉirkaŭrigardante la vizaĝojn, apenaŭ prilumitajn de la kena torĉo, fulganta en sia ingo:

Sur la ŝip' estis kiosko konstruita
Nu, kiosko konstruita el kupreso...
Tie staras ja tabloj multaj kverkaj,
Sur ili tukoj estas sternitaj silkaj...

Rjabov sidis nemalproksime de Silentulo, rigardis, kiel kuniĝis liaj brovoj super la nazradiko, kiel brileris la blankoj de la duonfermitaj okuloj, kiel stamfis li per sia bastoŝuo:

Ĉe la tabloj jen sidis dek du bravuloj,
Ja dek du bravuloj, ĉiuj Donaj kozakoj...

Kaj ree kun minaco — mallaŭta kaj kolera:

Estis unu el ili la bravul' plej brava,
Sur la ŝipo la bravulo jene iras,
La guzlion[78] sonoran li jene ludas,
Rememoras li pri l' patro — glora Don' kvieta...

77 La 6-a de januaro laŭ la Julia kalendaro. *(trad.)*

78 Guzlio — antikva rusa plurkorda plukmuzikilo laŭ tipo de citro (ne konfuzu kun guzlo, kiu estas unukorda arĉmuzikilo, kaj ne estas rusa) *(trad.)*.

La kanto al la maljunuloj ne plaĉis, ke ĝi estas malmulte dieca. Silentulo subridadis, montrante la egalajn blankajn dentojn, lia rideto estis malica, kruela. Rjabov penseme diris:

— Ne, la kanto estas nemalbona! Ĝi ne vane kantiĝas...

Silentulo ĵetis al li rapidan rigardon, denove mallevis ĝin. La maljunuloj rekomencis la sian — pri la kolerema Dio. Kiam ili finis kaj ekfanfaronis ĉiu pri sia kanto, Semisadov kraĉis kaj ordonis al Silentulo montri, kion li ankoraŭ povas, kaj plene. Silentulo ne respondis, ridetis.

— Kaj kiu, oĉjo, estas tiu homo, kiu en via kanto guzlion ludis? — demandis el malproksima angulo Demĉjo.

— La homo granda...

— Kiu do li estas?

Silentulo ĉirkaŭrigardis la domon super la kapoj de la laborantoj, diris nelaŭte, sed tiel, ke aŭdis ĉiuj:

— La kanto estis kreita pri Stefano Razin, jen pri kiu.

En la domo estiĝis silento. La maljunuloj ĉe la forno estis interflustrantaj. Semisadov laŭte suspiris. Silentulo tiris sin tiel, ke krakis la ostoj, demandis:

— Ĉu timiĝis vi?

Kaj komencis senŝuiĝi por dormi. La maljuna Pajga iris al la pordo — kuŝiĝi en malvarmo.

— Sed vi atendu! — petis Silentulon Rjabov. — Kial vi ekhastis? Vi bone kantas, ankoraŭ kantu.

— Ĉu kanti? Sed vi ĉiuj ja timas kantojn...

— Por kio ni timu? — demandis Semisadov. — Kanto, ĝi

por tio estas kanto, ke oni ĝin kantu. Kaj viaj kantoj estas bonaj — liberaj.

Silentulo kantis ankoraŭ:

Hej, ĵetiĝu, knaboj, suben laŭ Kamo-river',
Suben laŭ Kamo al blankŝtona prizon'.
La prizonon tutan mi disbatos je ŝton',
Sen haŭto restos l' Astraĥana vojevod'...

La maljunuloj komencis krucosigni sin, Semisadov laŭte rideris, Rjabov ruze mallarĝigis la okulojn.

Silentulo estis altvoĉe, kolere elkantanta:

Kaj ĵetiĝis la knaboj suben laŭ Kam'-river',
Suben laŭ Kam' al la blankŝtona prizon',
La prizonon tutan mi disbatis je ŝton',
Sen haŭto restis l' Astraĥana vojevod'...

— Pro kio li lin tiel, oĉjo? — demandis serioze Demĉjo.

— Evidente, laŭmerite! — respondis Rjabov.

Ĉirkaŭe oni ekparolis, ekdisputis, rememoradis maljustaĵojn kaj krimojn de vojevodoj, kancelarianoj, estroj, de la patro-ekonomo, de Jozefo Baĵenin, de la fremdlandanoj, de James, Snivin, de ĉiuj, kiuj turmentadis kaj malhonoradis senkulpajn Blankmarajn, Dvinajn laborantojn, fiŝkaptistojn, ĉasistojn, kampulojn...

— Ne sufiĉas ja nur la haŭto! — diris Semisadov. — Pro niaj malfeliĉoj eĉ je pli multo eblas senigi, por ke por ĉiam ili ne plu kutimu...

Ĉapitro dek unua

> Kaj ili senlace fosadis sapeojn sub la fortreson de la vero.
>
> *Petro la Unua*

1. Ŝtelistoj

En frosta venta krepusko sur la korton de la doganejo kun knarado enveturis pli ol dekduo da sledoj, kovritaj per bastomatoj, firme ligitaj per bastoŝnuroj. Viroj, kun glaciiĝintaj barboj, frostiĝintaj, koleraj, knutadis la lacajn ĉevalojn, postuladis la ĉefan homon, kriadis, ke ili ne atendos. Eŭdokimo Prokopjev vokis Krikov-on. Viro kun blua pro malvarmego vizaĝo petis Atanazion Petroviĉ-on:

— Akceptu la ŝarĝon, mastro. Kaj ne prokrastu, pro Dio, ni frostiĝis, ne povas plu toleri...

— Kaj kio estas la ŝarĝo? — demandis kun miro Krikov.

— De la ŝipkonstruejo — faruno sekala, biskotoj bakitaj, butero, salo, viandaj korpoj...

Eŭdokimo Prokopjev palpebrumis al Krikov. Tiu vokis dogansoldatojn, malfermis la tenejon, ordonis treni sakojn kaj barelojn. Li mem forkondukis la frostiĝintan veturigiston en la domon, regalis per vodko, sbiteno. La viro, mildiĝinte, rakontis, ke la trajno estis sendita ĉi tien fare de germano, nomata Schwieber.

— Kaj antaŭe ĉu vi veturigis de la ŝipkonstruejo? — demandis Krikov.

— En la gastejon mi veturigis por gastoj-negocistoj, — diris la veturigisto. — Dufoje en la Komercan korton veturigis. Tio jam en la aŭtuno estis, per radoj ni veturis.

En tiu minuto en la domon eniris per rapidaj paŝoj majoro James. Li estis furioza, sed retenanta sin, ĉar ankoraŭ ne elpensis, kion diri, sed ion diri nepre necesis.

Atanazio Petroviĉ rigardis al la majoro.

James ekparolis:

— En la ŝipkonstruejo ekzistis troo. Mi aĉetis tiun troon por nutrado de la soldatoj de la doganejo.

Krikov silentis. Eŭdokimo Petroviĉ rigardis en angulon.

— Mi aĉetis profite por la doganejo! — ekkriis James.

Atanazio Petroviĉ ankaŭ al tio nenion respondis.

Poste, konsiliĝinte kun Eŭdokimo kaj kaporalo Kostjukov, Atanazio Petroviĉ iris serĉi Ievlev-on. En la ŝipkonstruejo en Solombalo tiu ne estis, ne estis ankaŭ en la vojevoda domo, kie li loĝis. La maljuna pordisto diris al Krikov, ke Silvestro Petroviĉ jam antaŭ pli ol semajno forveturis al Vavĉugo — al la alia ŝipkonstruejo, tien oni eĉ poŝton veturigas el Moskvo.

Estis jam post la noktomezo, kiam Krikov surĉevale alveturis laŭ arbara vojo al la ŝipkonstruejo de Baĵenin. Estis frosto, malvarma vento vipadis la vizaĝon, glaciigadis, elbatadis larmojn el la okuloj. Baĵenin-aj gardistoj, armitaj per blunderbuzoj kaj arkebuzoj, longe ne enlasadis frostiĝintan Krikov-on en la domon de Jozefo Andrejeviĉ. Krikov kuraĝiĝis, diris, ke li venis pro cara urĝa afero. La pordego ekknaris. Atanazio Petroviĉ deĉevaliĝis, varmigante la

frostiĝintajn krurojn, rapide leviĝis laŭ la alta perono.

En la domo oni estis blovantaj fajron, kurantaj kun kentorĉoj, kun kandeloj. Aperis Baĵenin mem — grandega, nekombita, en lanugo, nudpieda, demandis, pro kia diablo li ĉiujn vekis? Krikov respondis, ke li diros pri ĉio al Ievlev kaj al neniu krome.

Silvestro Petroviĉ en surĵetita sur la ŝultrojn sciura peltaĵo rapidpaŝe eliris al Krikov, silente, ne interrompante, elaŭskultis la senartifikan historion pri tio, kiel trafis en la manojn de la doganistoj la ŝtelistoj de la ŝipkonstruejo.

Baĵenin ekridis en la pordo, diris al Krikov:

— Ĉu por tio vi la tutan domon vekis?

Ievlev returniĝis al Baĵenin, ordonis potence:

— Iru vi prefere for de ĉi tie, Jozefo Andrejeviĉ! Iru!

Baĵenin foriris, subridante, Ievlev trairis la ĉambron, ekparolis penseme:

— Do, dankon al vi, Atanazio Petroviĉ, dankon. Ankaŭ mi mem sciis, ke oni ŝtelas, priŝtelas la laborantojn, sed kiel la latronon kapti? Dankon! La ŝipkonstruado estas afero cara, kaj ŝtelado en tiu ĉi afero estas punenda kruelege. Bedaŭrinde, nia vojevodo, Teodoro Matejeviĉ, nun estas en Moskvo, li pri ĉi fiaĵoj estas severa, senkompata. Nu, ni sukcesos sen li. Post horo aŭ du ni veturos al Arĥangelsko, mi nur iomete parolos kun Koĉnev kaj kun la fremdulo, kun Jan...

— Ĉu ili akordiĝis? — demandis Krikov.

Ievlev svingis la manon:

— Tute ne! Ĉiun tagon ili kverelas, plumoj flugas, kiel ĉe

batiĝo. Mi pacigas, krias, skoldas ilin, labori necesas, kion fari... Senfortiĝis mi, Atanazio Petroviĉ: du konstruejoj, kiom da ŝipoj samtempe estas konstruataj, sed homoj fuĝas, ne laboras...

— Iuj fuĝas, iuj mortas! — kun kaŭstika subrido diris Krikov.

Silvestro Petroviĉ nenion respondis al tio.

Vespere ili ambaŭ revenis en Arĥangelskon, kaj Ievlev tuj vizitis kolonelon Snivin-on. Snivin estis afabla, profunde riverencis, diris, ke li vidas por si altan honoron en vizito de tiom glora gasto. Silvestro Petroviĉ lasis sen atento la vortojn de Snivin, ordonis tuj kaj sub forta gardo venigi majoron James-on kaj la superrigardanton de la ŝipkonstruejo — Schwieber-on. Por Schwieber Snivin sendis du rajdistojn, James mem eliris el la najbara ĉambro, — tie li estis ludanta ĵetkubojn kun la edzino de la kolonelo.

La majoro estis je kapo pli alta ol Ievlev, liaj sataj okuloj indiferente rigardis el sub la ŝminkitaj brovoj, sed Silvestro Petroviĉ tuj rimarkis, ke James timas, la indiferentecon li nur ŝajnigas. Ankaŭ Snivin estis alarmita. Anabela en la najbara ĉambro estis tordanta la brakojn kaj ploranta...

Schwieber neniom neis: li, enirinte, estis certa, ke la majoro jam ĉion rakontis kaj ĉion pentis. James stamfis kontraŭ li, nomis mensogulo, eĉ svingis la manon por bato, sed kolonelo Snivin konsilis al li esti prudenta.

— Mi supozis, ke mi agas ĝuste, kiam mi malkare aĉetis la provianton por la doganejo! — diris James. — Ĉu mi povis scii, ke ĝi estas ŝtelita? Schwieber vendas, mi aĉetas, jen ĉio!

— Ĉi agojn estas moro puni per senkompata knutado! — respondis Ievlev. — Latronojn oni ekzekutas malsame. Iam okazas, ke la ŝtelintan dekstran brakon oni rompas por ĉiam, por ke per tiu brako la latrono ne plu ŝtelu. Ankoraŭ oni elŝiras per pinĉilo la naztruojn, la orelojn forhakas, kaj nekorekteblajn ŝtelistojn oni pendumas sur placo. Pri la kruelaj moroj de la moskvianoj ankaŭ vi mem estas informitaj nemalmulte, vi ofte konversacias pri ĉi objekto...

Li parolis superflue, sed reteni sin ne povis.

— La ekzekuto per knutoj estas tre kruela. Knutado senkompata signifas morton — ne malpli ol tio...

James komencis ofte spiri, lia rigardo el sata iĝis peteganta, Schwieber falegis antaŭ Silvestro Petroviĉ sur la genuojn. Ievlev, ne rigardante al ili, diris al Snivin:

— Ĝis la veno de sinjoro vojevodo mi ordonas al vi, kolonelo, teni James-on kaj superrigardanton Schwieber-on en hejmaresto sub severa gardo. Ilian posedaĵon mi same ordonas al vi, kolonelo, deklari arestita, kaj la monon kalkuli kaj sigeli per ŝtata sigelilo. La farunon, viandon, biskotojn — ĉion, kio estis veturigita en la doganejan korton, tuj vi devas transporti en Solombalon, al la ŝtata ŝipkonstruejo... Superrigardanto Schwieber, vi veturos kun mi en la ŝipkonstruejon, mi devas scii, kun kiu kaj kiel vi ŝtelis...

Ne riverencinte, li eliris el la domo de la kolonelo, saltis en la selon, pelis la elturmentitan ĉevalon al Solombalo. Post li en sledkaleŝo sub gardo veturis Schwieber, mungante sin kaj plorante.

En la ŝipkonstruejo Silvestro Petroviĉ entreprenis

enketadon. Schwieber tuj nomis siajn helpantojn: ekspopon Goloĥvostov-on kaj servutulon kun alnomo «Ĉizilo». Goloĥvostov nenion konfesis, sidis ŝvela pro drinkado, aroganta, subridadis, montrante nigrajn dentoradikojn; servutulo Ĉizilo ekploregis, komencis serĉi la manon de Ievlev por kiso.

Ievlev ordonis konduki sin en la kuirejon.

En la korto batis tamburoj, vekante la laborantojn. Malvarma frosta vento estis blovanta de la maro. Malklare blankis neĝokovritaj fermitaj hangaroj. Frapadis pordoj de kabanoj, en mallumo de ĉie aŭdiĝis streĉa tusado, blasfemado, paŝbruo de botoj, krioj de dekestroj kaj brigadestroj — la homoj iris al laboroj. Helpantoj de forĝistoj estis blovekscitantaj fajron en fandfornoj, malhelruĝa flamo prilumadis la maldikajn mortpalajn barbajn vizaĝojn, alterne kun sonorado batadis marteloj, grincadis segiloj. Estis ekbolanta gudro en kaldronoj...

Silvestro Petroviĉ eniris en la kuirejon, du kuiristinoj timigite riverencis; li prenis de unu el ili ĉerpilon, verŝis por si en bovlon, gustumis, demandis per furioza voĉo:

— Ĉu por homoj kuirita?

La kuiristinoj eksplorĝemis, superrigardanto Schwieber singarde gustumis la kuiraĵon, diris, levinte la ŝultrojn:

— Ĉi supo estas ne tiom malbona!

Al Silvestro Petroviĉ ŝajne eĉ heliĝis la vizaĝo:

— Ne tro malbona? Do...

Kaj li ordonis verŝi por ĉiuj tri ŝtelistoj po plena bovlo, por

ke ili satmanĝu. La ŝtelistoj manĝis, li staris super ili, demandadis:

— Ĉu bonas la supo?

De Schwieber fluis ŝvito, li glutadis pene, sufokiĝante; sed Ievlev estis tiom timinda, lia mano kun tia forto estis kunpremanta tataran skurĝon, la okuloj tiel mallarĝiĝis, ke la superrigardanto ĉiam plu glutadis kaj glutadis kaj neniel povis halti. De malantaŭe, mole paŝante en feltbotoj, aliris Ivano Kononoviĉ, diris, rigardinte al Schwieber:

— Mortos li, Silvestro Petroviĉ...

Ievlev ordonis konduki la ŝtelistojn sub gardon, kaj mem eliris al vento — spiri. La tutan tagon li pasigis en Solombalo, penis starigi bonan ordon en la konstruejo, iradis en la kabanojn, mem rigardis, kiel oni metas en kaldronojn provianton, mem gustumadis kaj kun angoro pensis, ke en Vavĉugo, verŝajne, estas neniom pli bone, ol ĉi tie. Ŝtelado tie estas ne nokta, sed taga, kaj Baĵenin en ĝi estas ne la lasta homo. Kion do fari? Kion li povas fari?

Ĝis la malfrua nokto li trasidis sur benko en la sufoka kabano de ŝipkonstruaj laborantoj — ĉarpentistoj, forĝistoj, kalfatristoj. La popolo paroladis, li aŭskultadis, ne aŭdacante rigardi en la okulojn de la homoj, ne aŭdacante interrompi. Kiam ĉiuj sate eldiris, Ievlev kun peno levis la rigardon, ekparolis malrapide, malfacile:

— Ŝipojn konstrui estas afero cara, ŝtata. Tempas, ke estu floto...

Semisadov diris kun suspiro:

— Ni scias, Silvestro Petroviĉ. Se nur al ni estu pli facile:

tro multe mortas la popolo. Se iomete pli facile...

Ievlev respondis, ke la krimuloj estas kaptitaj, estos punitaj, la nutrado estos pli bona. Rjabov subridis al liaj vortoj, diris moke:

— Oj, Silvestro Petroviĉ, ĉu vere? Unu latronon vi kaptis, aliaj ne kaptiĝos. Estos pli ruzaj. Kaj vere: en Vavĉugo vi mem vidis, sed ĉu tie estas pli bone? Oni diras, ne pli bone — malpli, kaj de vi eĉ ĉio estas kaŝita. Ĉi tie Schwieber estas, germano, en Vavĉugo Baĵenin estas nia propra. Sed kia utilo?

Silentulo de malproksime kun malamo kriis:

— De ili ni ne ĝisatendos! Ni malsatos, per knutoj nin oni vipos, manojn-piedojn elŝiros, eĉ en la lasta juĝo en tia aspekto aperi estos hontinde...

Silvestro Petroviĉ mallarĝigis la okulojn al la nigrabarba, vila Silentulo, demandis abrupte:

— Kiu estas?

— Homo dia, afero ne via! — arogante respondis Silentulo.

Tiel per nenio finiĝis la konversacio. La homoj estis elturmentitaj kaj furiozigitaj ekstreme, ĉiuj deziris foriri el la ŝipkonstruejo, pri la fremdlandaj majstroj Nikols kaj Jan menciadis kun malamo, Schwieber-on minacis mortigi, se li iam ankoraŭ venos en la ŝipkonstruejon.

Nokte Silvestro Petroviĉ revenis en la malplenan malvarman vojevodan domon, elbatis fajron, bruligis kandelojn, ordonis sendi al li la kancelarianon kun poŝto kaj hejti la fornon. Kiam la kancelariano eniris, Ievlev jam dormis, maloportune retrokliniĝinte en la fotelo...

2. Granda interkonsenta manpremo

Sabate en la ŝipkonstruejon venis la patro-ekonomo, alveturigis por la fiŝistoj, kiuj laboris iam por la Nikola-Korela monaĥejo, almozon: sledon da sekalaj pirogoj kaj peklita fiŝo, du bareletojn da matura kvaso. La laborantoj pri la almozo subridadis:

— Turmentantoj damnitaj. La pirogojn ili bakis el putra faruno. Odoregas je ŝimo...

— Kaj la fiŝo! Kiel ili ĝin peklis!

— Monaĥeja almozo estas konata afero...

Por la estraro estis speciala donaco: por Nikols kaj gardistoj, brigadestroj, dekestroj — sunsekigita alka viando, bonkvalitaj kokoj, plej bonaj medoj, fiŝoj, fumaĵitaj sur junipera fumo.

Venis Agafoniko por afero: persvadi la fiŝistojn ree iri labori por la monaĥejo. Al la ekonomo la estraro ne kontraŭis: la homoj en la ŝipkonstruejo malfortiĝis, venis tempo anstataŭigi ilin. La anstataŭontojn jam estis pelantaj pafistoj laŭ vojoj el Onego, Pinego, de Poveneco kaj Kargopolo. La ŝipa afero jam estas farita multe. Finfaros ĝin aliaj...

Agafoniko, levante per la mano la baskon de sia longa kaftano, trairis la ŝipkonstruan korton, eksidis en la kabano de la laborantoj, apogiĝis per la barbo al la apogbastono, demandis:

— Humiliĝis vi, spituloj, mi pensas?

Rjabov, enŝovante en la buŝon monaĥejan pirogon, rigardis al la ekonomo sendeŝire, ĝis tiu formovis la rigardon. Same rigardis ankaŭ Semisadov, bruligis per la enkaviĝintaj okuloj.

Kaj nekonata nigrabarbulo, verŝajne el prizonuloj, ridetis en la lipharojn.

Agafoniko, kuntiriĝinte, ekparolis:

— Sinjoroj ŝipistoj povas vin, infanoj, lasi iri en la monaĥejon, se la monaĥejo pagos anstataŭ vi la ŝuldojn kaj aldonos elaĉeton. Nun patro prioro pro paso de tempo vin pardonis, ĉar vi ne sciis, kion vi faris. Se vi viajn vivojn alte taksas, saviĝu — ja jen kiom da homoj mortis...

Kaj Agafoniko lamente balancis la kapon.

Rjabov eliris antaŭen, demandis:

— Ĉu antaŭpagan drinkmonon vi kunhavas?

Agafoniko pro kolero saltetis, frapis la plankon antaŭ si per la apogbastono: prizonuloj, vivaj mortintoj, sed jen, pri partopago ili rezonas, kvazaŭ ili estas liberaj, kvazaŭ ili estas mastroj por si mem.

— Kion?!.

— Mi demandas — ĉu vi havas kun vi la antaŭpagon? — trankvile ripetis Rjabov.

— Sed ĉu vi freneziĝis? Ĉu ne sufiĉas ĉio, kio estis? Mi ilin savi venis, kaj li kion al mi diras?!.

Rjabov reĝustigis la kentorĉon en la ingo, kunmetis sur la brusto la fortikajn manojn. La fiŝistoj sidis kaj staris ĉirkaŭe — kvietaj, timigitaj, ĵetadis rigardojn kun atendo jen al la ekonomo, jen al Rjabov, jen al Semisadov kaj Paŭĉjo Silentulo.

— Ne vi, patro, la unua nin deziras, — malrapide, kun digno ekparolis la rudristo, — ne vi, se donos Dio, ankaŭ la lasta. Nia maro estas granda, kaj fiŝistoj en la maro ne tiom multas. La

monaĥejo sian trezoron per fiŝo kunmetas — tion ĉiuj scias. Se vi prenos ĉiajn ajnulojn — vi mem pentos. Via ilaro estas multekosta, riĉa, vi ne tuj la novan konstruos. Ĉu mi ĝuste diras, amikoj?

La fiŝistoj nekuraĝe konfirmis:

— Tiele!

Rjabov parolis plu:

— Ofendojn vi al ni, la monaĥejaj laborantoj, malbonajn faris. Vi preĝas, sed ne laŭ Dio agas! Pro kio per kruela mallibero punitaj estis multaj marlaboruloj? Pro kio estis fermitaj en subteraĵo, kvazaŭ latronoj, niaj bonaj laborantoj? Pro kio min kiel sklavon en fremdlandan ŝipon vi vendis?

Agafoniko komencis frapi per la apogbastono, krii, kraĉi, sed baldaŭ kvietiĝis. La fiŝistoj rigardis al li per koleraj okuloj. Plej malice rigardis la nigrabarba nekonato. Rjabov silente elaŭskultis ĉiujn minacojn kaj insultojn de la patro-ekonomo kaj obstine rediris la sian: nun ne estos tio, kio estis en la pasinta jaro. Ruze mallarĝiginte la verdajn okulojn, li subite komencis laŭdi la laboron en la ŝipkonstruejo: pli valoras tuj ovo, ol poste bovo, ĉi tie caraj ŝipoj estas konstruataj, granda estos pro tio por la laborantoj respekto kaj rekompenco...

La ekonomo pro miro eĉ la buŝon malfermis: jen kiel la rudristo mensogas lerte. Rekompenco por ili ĉi tie estos, certe!

Ili marĉandis kaj kverelis ĝis malfrua nokto. Fine Agafoniko forveturis sen rezulto.

Kiam la pordo post la patro-ekonomo fermiĝis, la maljunuloj atakis Rjabov-on:

— Nun pereis ni...

— Via stulta obstino por ni estas morto...

— Jen, kia heroo troviĝis: estu pereo, nur kun gloro!

Rjabov-on defendis Silentulo kaj Semisadov. La rudristo ne respondis. Silentulo kolere montradis la blankajn dentojn, insultadis responde:

— Timiĝis vi! Preĝantoj! Tutegale li ĉi tien venos — nenien li krome povas iri...

Avo Simono ofensivis:

— Ĉu nenien? Ĉu ni estas solaj en la mondo?

Silentulo kriis:

— Ankaŭ en la libero estas bonaj homoj. Ili nin ne perfidos, mi pensas, ili komprenas la aferon...

Semisadov diris edife:

— Kuraĝulo fiŝsupon manĝos, kaj malkuraĝulo eĉ pankaĉon ne havos! Paciencu iomete, laborantoj. Venos al ni la ekonomo, vi vidos...

Dum du tagoj pri la ekonomo estis neniaj informoj. En la tria li venis en la kabanon — fari grandan interkonsentan manpremon. Li ree alveturigis regalon — ankoraŭ tutan sledon.

— En la pasinta fojo, ne por ofendo mi diros, — parolis Rjabov, — la faruno kun putro estis... Sed nun rememori ne indas, mi simple mencias, por konversacio...

Agafoniko suspiris:

— Ĉu eblas ĉion observi? En humidan lokon oni metis la farunon — tial ĝi malboniĝis...

Antaŭ ol fari interkonsenton, Rjabov por plezuro de la laborantoj demandis:

— Ĉu aliajn vi ne trovis? Ĉu ĉe ni fiŝistoj finiĝis?

Agafoniko ŝajnigis, ke ne aŭdas, levis la manikon, metis en la polmon, laŭ la moro, drinkmoneron. Rjabov same levis la manikon de sia kaftano. Ili bate manpremis kun tia forto, ke Agafoniko pro doloro misformis la buŝon. El la mano en la manon transiris la drinkmonero. La novico, kiu venis kun Agafoniko, donis al ĉiu ledan markon, — ĝi signifis, ke oni ne prenu ion plian de la laboranto, li estas pura antaŭ la cara fisko. Matene oni devis liberigi la fiŝistojn...

— Jen kiele, — eldiris Semisadov, elakompaninte la ekonomon, — ni vivas — panon maĉas, kaj poste eble ankaŭ kun salo...

3. Estos milito!

En malfrua nokto al la pordego de la dormanta domo de la vojevodo de Arĥangelsko kaj Ĥolmogoro ekfrapis fortaj koĉeraj pugnoj, en la ĉambro de la pordisto eklumis fajreto, en ĉambroj kaj vestibloj ekkuris dormemaj servistoj, ektrenis brullignon — hejti fornojn, sakojn al la kuirejo — prepari manĝon, akvon sur sitelportiloj — por la banejo. La pordegisto kun riverencoj malfermis ambaŭ klapojn de la knaranta pordego, la trajno de la vojevodo enveturis la korton. Silvestro Petroviĉ, dormema, en ŝafa inversigita peltjako, en feltbotoj sur la nudaj piedoj, dekuris de la perono, ĵetiĝis brakumi la karan amikon, sed el la kaleŝo anstataŭ Teodoro Matejeviĉ eliris Manjo, bone ĉirkaŭkovrita, kun brilantaj en luna lumo okuloj, kun belkavetoj sur la vangoj, — tia bela, brava kaj freŝa, ke

Silvestro Petroviĉ eĉ iel malfortiĝis, ne kredis sian ĝojon, depaŝis malantaŭen, en neĝamason. Eltirante la piedojn el lupa felo, Apraksin gaje ridis, demandis laŭte, por la tuta korto:

— Kial, Silvestro, vi la didonitan edzinon ne rekonas? Kien vi de ŝi fuĝas? Konduku ŝin tuj en la domon, ŝi elturmentiĝis dum la vojo, frostiĝis tuta...

Ievlev, ne hontante ĉevalistojn, bruantajn per jungilaro, koĉerojn, ĉasgardistojn, brakumis la edzinon, kisis ŝiajn malvarmajn vangojn, la okulon, la tempion. Ŝi flankeniĝis, rigardis al lia vizaĝo, flustris:

— Kvazaŭ ne estas vi! Kiel vi maldikiĝis! Silvestro, karulo mia...

La ĉefĉambroj de la vojevoda domo odoris kiel neloĝataj, fumis fornoj, kun laŭta bojado, frapante per la ungoj nudajn tabulojn de la planko, kuradis longmuzelaj ĉashundoj. En la supraj ĉambroj estis pli varme, la plankojn ĉi tie Ievlev kontinue kovris per lanugaj feloj de blankaj ursoj kaj boacoj, sur la murojn pendigis tapiŝojn, sur la tapiŝojn — ĉaskornojn, pikstangojn, tranĉilojn, muskedojn de Teodoro Matejeviĉ. Sur la tablo meze de la ĉambro de Ievlev malhele brilis polurita kupra globuso, kuŝis pipoj — argilaj kaj erikaj, tabaksaketoj, stakiĝis cirkelgarnituro, ŝipaj desegnaĵoj, libroj kun bovledaj kaj marokenaj bindaĵoj...

— Kiel en Moskvo, ĉe oĉjo! — diris Manjo.

— Kio estas kiel ĉe oĉjo? — ne komprenis Silvestro Petroviĉ.

— Libroj, folioj, listoj...

Li kapjesis, plu ne kredante al tio, ke Manjo estas kun li, ĉi

tie, en Arĥangelsko. Manjo suspiris, petis senhelpe:

— Tiru la manikon, mi ne povas ja mem la peltmantelon demeti.

Silvestro Petroviĉ tiris, — unu peltmantelo demetiĝis, sub ĝi evidentiĝis alia, malpeza.

— Ankaŭ ĝin demetu! — diris Manjo.

Ievlev demetis la alian, sub ĝi estis pelta kamizoleto.

— Kvazaŭ brasiko! — ekridis feliĉe Silvestro Petroviĉ.

Ambaŭ peltmanteloj kaj la kamizoleto kuŝis sur la planko, neniu levis ilin. Manjo transpaŝis la pelton, Ievlev etendis al ŝi la manojn, ŝi alpremiĝis al li per la tuta korpo.

— Ĉu vi multe suferis? — avide kisante ŝin, demandis Silvestro Petroviĉ.

— Tro multe da lupoj kuras sur vojoj! — respondis Manjo. — Ili ĉiam saltas poste. Kaj iliaj okuloj estas verdaj. Kaj ankaŭ rabistoj estis...

Ŝi malagrafis sur la brusto la veŝton, skuis la kapon, la haroj disŝutiĝis. Per la maldikaj fingroj ŝi komencis rapide plekti harligon. Ŝiaj vangoj intense ruĝis post la frosto.

— Ĉu vi longe veturis?

— Rapide!

Silvestro Petroviĉ, malhelpante al ŝi, plektis kune kun ŝi la harligon. Ili plektadis longe, implikiĝante per la fingroj, ĵetante feliĉajn rigardojn unu al la alia. Li demandadis pri Moskvo, pri oĉjo, pri Manjaj amikinoj kaj pri siaj amikoj, ŝi respondadis mistrafe, ambaŭ pro tio ridis.

— Atendu! — diris Manjo, depuŝante la edzon.

Knaris la pordo. La servistino de Manjo alportis keston kun aĵoj, sakon, poste servisto, spiregante, trenis pakon, enkudritan en bastomaton, — librojn, donacon de Rodiono Kirilovič. La servistino riverencis al Ievlev, gratulis pro la bona revidiĝo. Trans la muro brufalis sur la plankon ankoraŭ unu fasko da rezina brulligno. Teodoro Matejevič ordonis hodiaŭ hejti pli forte, por ke varmiĝu la juna edzino de Silvestro Petrovič.

— Ja ŝi varmiĝos sen forno, — grumbleme respondis la maljuna ĉefservisto de Apraksin. — Tio ne estas nia zorgo, Teodoro Matejevič. Mi ĵuse enrigardis en ilian ĉambron — Silvestro Petrovič al sia bojarino harligon plektas. En la antaŭaj tempoj tio ne estadis...

Apraksin sidis en fotelo ĉe la forno, etendinte la piedojn al la fajro, kun sulkita frunto. Malantaŭ la dorso oni tusis — li returniĝis: kolonelo Snivin, eksciinte de bariergardistoj pri la veno de sinjoro vojevodo, venis al li esprimi sian respekton kaj interesiĝi pri la valorega sano. La vojevodo pri la sano respondis mallonge kaj seke kaj ordonis raporti, kio kaj kiel estas en la urbo. La kolonelo kun riverenco rakontis diversajn bagatelojn. Apraksin aŭskultis, malkontente kunpreminte la lipojn, senmove rigardante al la fajro.

— Ĉu krome nenio estis?

La kolonelo ankoraŭ riverencis, rakontis pri tio, ke sinjoro de nobela gento oficiro James estas arestita de sinjoro tablestro Ievlev kune kun eksterlanda regnano Schwieber. Ambaŭ suferas kaj atendas favoran permeson de la altrespektinda vojevodo.

— Pro kio ili estis arestitaj? — interesiĝis Apraksin.

Snivin rakontis. Apraksin, plu rigardante al la fajro, respondis:

— Laŭ latrono estu tenajlo, laŭ ŝtelisto knuto!

La kolonelo rektiĝis, kunmetis la manojn sur la spada tenilo, prononcis per multesignifa voĉo:

— Majoro James estas oficiro, kaj lia honoro ne permesas al mi...

Al Apraksin pro furiozo rondiĝis la okuloj, li leviĝis, ordonis al Snivin neniam plu ŝovi sian nazon en fremdajn aferojn. Al la vespermanĝo la kolonelo ne estis invitita, kvankam li vidis, ke servistoj primetas la tablon. Snivin foriris verda pro ofendiĝo...

Manĝaĵojn dismetadis Manjo. Teodoro Matejeviĉ deklaris, ke nun en la vojevoda domo ŝi estu plenpotenca mastrino. Ĉe la tablo ili tuj ekparolis pri aferoj, pri konstruado de ŝipoj, pri tio, kio okazas en Moskvo. Pri James kaj Schwieber Apraksin demandis pretere kaj diris, ke li tenos la fiulojn enŝlositaj ĝis kiam ili ekhurlos kiel lupoj...

— Nun aŭskultu pri la militiro Koĵuĥova[79], — parolis Teodoro Matejeviĉ. — Pri ĉi militiro Moskvo longe memoros. Eĉ via Manjo aŭdis pri ĝi, kvankam militiro ne estas virina afero.

— Mi kun oĉjo en tiu tempo gastis en Kolomno, ĉe

79 Koĵuĥova militiro (la 27-a de septembro — la 17-a de oktobro 1694) — fortresaj (inĝenieraj) manovroj de rusiaj trupoj, organizitaj de Petro I ĉe vilaĝo Koĵuĥovo apud Moskvo. Tio estis fakte la unuaj grandaj inĝenieraj manovroj en Rusio. La militiro montris avantaĝojn de regimentoj de «nova ordo» kompare kun la malnovaj «pafistoj». *(trad.)*

Moskvo-rivero, — diris Manjo. — Al ni iris vunditoj kaj kripligitoj. La korto estis plena de homoj... Kaj preobraĵenskanoj estis, kaj semenovskanoj, kaj butirkanoj[80]...

Apraksin ekrakontis, kiel trupoj de Romodanovskij transiĝis trans Moskvo-riveron sur boatoj, kovritaj per tabuloj kaj traboj. En tiuj ŝipoj estis trahakitaj truoj, el kiuj pafis kanonoj. La aferon partoprenis husaroj, sabristoj, rajdistaj rotoj kaj multaj regimentoj, kaj krom tio tre kverelis la komandantoj — Buturlin kaj Romodanovskij. Ivano Ivanoviĉ eĉ mem pafis al Teodoro Jurijeviĉ. La pafistoj en multaj bataloj ricevis ekzemplan draŝon, kaj la ludsoldatoj ilin ĉiam venkis. La bombardisto de la Preobraĵenska regimento — la caro mem — militkaptis la pafistan kolonelon Sergejev-on, pro kio la ĉefgeneralo lin speciale dankis. Petro Aleksejeviĉ mem konstruis bruligan ĉaron kun lanco, la ĉaro estis bruligita, ruligita, kaj la lanco enpikiĝis en la remparon de la kontraŭulo. La plektobarilo ekbrulis, la tero defalis, la militistaro ekiris al sturmo.

— Ne komprenas mi, — interrompis Ievlev. — Kio ĝi estis? Ĉu ludbatalo?

— Manovroj! — respondis Apraksin. — Kaj estas bedaŭrinde, amiko mia bona, ke ni tie ne estis. Multon gravan kaj necesan la militaj homoj el tiuj manovroj por si eksciis kaj firme memorfiksis: kaj sapeojn, kaj eksplodojn per minoj de

80 Preobraĵenskanoj — soldatoj de la Preobraĵenska regimento, formita de Petro I en 1690 el ludsoldatoj de vilaĝo Preobraĵensko. Semenovskanoj — soldatoj de la Semenovska regimento, formita de Petro I en 1683 el ludsoldatoj de vilaĝo Semenovsko. Butirkanoj — soldatoj de la Butirka regimento (laŭ vilaĝo Butirko, kie ĝi lokiĝis poste), formita ĉirkaŭ 1640 kiel regula regimento de fremdlanda ordo. Ĉiuj ĉi regimentoj estis unuj el la plej malnovaj regulaj regimentoj de Rusio. *(trad.)*

fortresa muro, kaj sturmon kun eskaloj. Estis multaj grenadoj, kaj bomboj, kaj eĉ pli multe — potoj, plenigitaj per pulvo. Oni surŝutadis foskavojn antaŭ la malamiko, sub pafado; sub pafado oni konstruadis redutojn, tranĉeojn, — ĉio ĉi estas sciencoj tre utilaj...

— Ĉu pli utilaj, ol ĉe Perejaslavlo?

— Kompari ne necesas! — respondis Apraksin. — Ĉu eblas kompari niajn navigojn sur la tiea lago kun la eliro en la Malvarman maron? En Perejaslavlo estis ludo, ĉi tie — manovroj...

Manjo ekdormis en varmo, ŝia kapeto pendiĝis, la spiro ne estis aŭdebla. Apraksin kaj Ievlev interŝanĝis rigardojn, Teodoro Matejeviĉ diris flustre:

— Portu ŝin, karan, supren kaj eliru por ankoraŭ du vortoj...

Manjo malfermis la dormemajn okulojn, ridetis, diris kun ektimo:

— Mi ekdormis... Jen kia honto...

Kaj ŝanceliĝante, kvazaŭ ebria, ŝi foriris en la ĉambron, supren. Apraksin ŝlosis la pordojn, ne sidiĝante, diris al Ievlev:

— Estos milito, Silvestro. Sufiĉe la rusianoj pagadis tributon al la krimea Ĥano. Dum multaj jaroj oni paroladis pri tio, sed kia senco en parolado? Hodiaŭ de sur la Lita Perono sekretario Vinius deklaris al tablestroj, subtablestroj, nobeloj Moskvaj kaj aliaj, ke ili, levinte militistaron, kuniĝu en Sevsko aŭ Belgorodo al Ŝeremetev por granda ĉasado...

— Ĉu ĉasi Krimeon? — kun batanta koro demandis Ievlev.

— Tio estas ne ĉio. Petro Aleksejeviĉ iros al Azovo. Tie

ŝipoj necesos.

Ievlev eksidis, verŝis por si kvason, sed trinki forgesis. Teodoro Matejeviĉ, fumante per pipo, apogiĝinte al la tablo per la mano, diris per firma voĉo:

— Ŝipajn majstrojn-lertulojn necesas konduki al Moskvo. Tie grandaj laboroj jam hodiaŭ komenciĝos. Ĉarpentistojn ŝipajn, kalfatristojn, forĝistojn lokajn, marlaboristojn per granda kvanto peli al Moskvo. Kiel ni ĉi tie plu konstruos — mi ne scias, sed ju pli multajn homojn ni donos tien por konstrui ŝipojn — des pli bone por la afero...

— Kiam do ili sukcesos?

— Se hodiaŭ oni ne sukcesos, en alia jaro atingos. Kaj ankaŭ ni — mi kaj vi, pensas mi, nun nelonge ĉi tie estos. Mi konsolas min per espero — nemulte da tempo restis por la regatoj de la sultano, la tataroj, vagi en stepoj[81]. Tie, trans Belgorodo, trans Kursko, trans Voroneĵo, militon kontraŭ la tataro oni atendas kun malpacienco. Kiom eblas toleri sakrilegiojn super nia tero?

Silvestro Petroviĉ silentis. Apraksin aliris pli proksime, metis la manon sur lian ŝultron. Tiu ekrigardis al li klare kaj rekte.

— Pri kio vi silentas? — demandis Teodoro Matejeviĉ.

— Malfacile estos! — diris Ievlev. — Malfacile, sed alie esti ne povas. Kion la bojaroj decidis?

Apraksin rakontis, ke post la peticio de la Moskvaj

---

81 La rus-turka milito de 1686–1700 okazis interalie pro intenco ĉesigi rabatakojn de la Krimea Ĥanlando kaj Turkio al la rusia sudo. La Krimea Ĥanlando estis vasalo de Turkio (la Otomana imperio). *(trad.)*

negocistoj, en kiu tiuj petis defendi la Tombon malplenan kaj Golgoton kaj purigi la vojojn suden, al la Nigra maro, la bojaroj decidis kunvoki milicion. Oni multe parolas en Moskvo pri tio, ke necesas militi en la nordaj maroj. Post la Koĵuĥova militiro iuj malkredantoj ekkredis, ke ankaŭ la svedon ni venkos. Tamen, ankoraŭ multas tiaj, kiuj eĉ ĝis nun subridas: «Ĉe Koĵuĥovo ŝerci estas facile, sed vi la tataron elprovu, kia li estas kun sabro en kampo!»

Silvestro Petroviĉ respondis malmilde:

— Ni elprovos. Ne per pafistaj regimentoj ni iros ĉasi lin, hundaĉon, sed per alia militistaro...

4. Denove la monaĥejo

Ĉe frosta matena ĉielruĝo Rjabov eliris el la kabano — rigardi al la ŝipoj. Hodiaŭ oni laboris nenie, ĉio silentis en la ŝipkonstruejo. La rudristo malrapide ĉirkaŭiris fermitan hangaron. En frumatena krepusko la ŝipo ŝajnis grandega...

Li eliris eksteren, rigardis la alian, kiu staris en malfermita hangaro, kaj subite eksentis, ke li bedaŭras foriri — tiel multe estis farita ĉi tie per la propraj manoj. Iĝis domaĝe, ke iros ili nun sen li, jenaj beluloj, iros malproksime, en grandan oceanan navigon, iĝis domaĝe, ke rudristo tie estos fremda homo, ne scianta, kiel oni konstruis, kiom trasuferis, kiom ŝvitlaboris, ĝis elirigis jenan grandegaĵon...

Post la pobo li kunpuŝiĝis kun Semisadov, demandis:

— Kial vi vagas?

— Kaj vi kial?

— Promeni eliris iomete...

— Nu, kaj mi promeni...

Ili ankoraŭ kune rigardis la ŝipojn, miris, ke baldaŭ ili iros en la maron.

— Ĉu estos ili boniraj? — demandis zorgeme Semisadov.

— Sed por mi estas fekegale — ĉu boniraj aŭ neboniraj! — respondis Rjabov en kolero.

— Kaj ankaŭ por mi egale, por konversacio mi diras...

La suno estis leviĝanta frosta, ruĝa, prujno sur la ŝipoj eklumis per roza koloro.

— Kiam oni mastojn metos — tiam ĝi aspektos bele! — diris Semisadov, retroturniĝante.

— Ili havos realan aspekton en la maro! — diris Rjabov.

Ili ankoraŭ rigardis. Al ambaŭ la okuloj iĝis enuaj.

— Do, ni iru, ĉu? — diris Rjabov.

Nemalproksime, en la preĝejo de Barbara, oni sonoris frumatenan diservon. Trans la alta palisbarilo la fiŝistojn atendis fiŝistaj edzinoj, patrinoj, fratinoj, filoj, filinoj, — staris belvestitaj, feliĉaj. En larĝa sledo, kovrita per lupfela kovrilo, alveturis Agafoniko, li aspektis kortuŝita, ŝovadis al virinoj la manon por kiso, diradis miele:

— Tiele, fraĉjoj, tiele, bonaj! Vi pentis, kaj la Plejalta pardonis. Nun ni vivos bonkore, memorante Dion. Nu, iru en paco!

En la elirejo fariĝis tumulto. Gardistoj ektrenis el la amaso de la forirantaj fiŝistoj la samojedan maljunulon Pajga-n.

Rjabov forpuŝis la gardistojn, diris al Agafoniko:

— Se oni ĉi kriplulon mizeran ne liberigos — mi mem restos! Ĉu eblas tielajn malfeliĉulojn forkapti kaj turmenti arbitre...

Baĵenin, alveturinta el Vavĉugo, piedfrapis Pajga-n, la maljunulo elsaltis trans la pordegon. Jozefo Andrejeviĉ, ebria, estis en bona humoro, riverencadis al la laborantoj, diradis:

— Pardonu, se mi per io kulpas...

— Pardoni ja tute ne indas, — diris, preterpasante, Silentulo.

— Kiu malbonaĵon diris? — kriis Baĵenin.

Sed Silentulo perdiĝis en homamaso. Li paŝadis apud Semisadov, diradis, ne malfermante la lipojn:

— Ĉiujn ilin, hundojn rabiajn, sur unu branĉegon...

En la ŝipkonstruejo, trans la fermiĝinta pordego, ŝrikadis segiloj, frapadis hakiloj. Foriris nur kvardek naŭ viroj, pli ol kvarcent restis konstrui ŝipojn. Anstataŭ la foririntoj oni alpelis novajn — ili estis pli freŝaj, pli fortikaj, pli sanaj...

Ĉe avino Eŭdoĥa estis hejtita la banejo, kuirita brasiksupo; Rjabov ŝvitbanis sin, trinkis sate mentan kvason, eniris en la domon. Taisja sendeŝire rigardis al li per grandegaj okuloj. Li prenis ŝin per la polmoj je la vangoj, subridis, demandis flustre:

— Ne laciĝis vi ankoraŭ, kara? Tro karesas nin la vivo...

Taisja balancis la kapon. Sur ŝiaj vangoj subite ekfluis larmoj. Rjabov viŝis ilin per la polmoj. Sub la mano sur ŝia maldika kolo estis malforte pulsanta ia vejneto.

— Kvazaŭ birdeto! — diris la rudristo.

Ŝi metis la manojn sur liajn ŝultrojn, diris, plorante per feliĉaj abundaj larmoj:

— Ivaĉjo, baldaŭ mi naskos. Ni havos infaneton...

Vespere la domon plenŝtopis homoj. Venis Krikov, brakumis la rudriston. Taisja timide diris:

— Riverencu al Atanazio Petroviĉ, Ivaĉjo. Pro ĉio riverencu. Kaj ankaŭ pro la brasiksupo kun anseraĵo.

Krikov ruĝiĝis, konfuziĝis:

— Ne indas eĉ paroli...

Enmiksiĝis avino Eŭdoĥa:

— Li por ni, Ivaĉjo, tabulojn eltranĉis, ni per tiuj tabuloj ŝtofon stampas kun ornamoj — vivas sate. Li por ni, Ivaĉjo, malnovan sekreton eksciis — kiel farbon kuiri, por ke ĝi ne forlaviĝu en akvo. Kaj kiaj ornamoj estas, Ivaĉjo, en bazaro tiujn ornamojn oni el miaj manoj elŝiras...

Kaj ŝi komencis ĵeti el kofro sur benkon broditajn tolojn. La printempa suno penetris en la fenestreton, arĝente prilumis naĝantajn sur toloj barkojn, krutan ondon, levitan velon, herbojn, mirindajn arbojn... La fiŝistoj skuadis la kapojn, laŭdadis, grakadis.

Ĉe la brasiksupo fiŝisto Partenio, viro severa kaj neparolema, subite diris:

— Estu sana por longaj jaroj Atanazio Petroviĉ. Mi lin eĉ je hartufoj tiradis en malnovaj tempoj, sed nun mi ordonas: riverencu al sinjoro Krikov. Li eksciis, ke monaĥoj el la Nikola-Korela monaĥejo malbonon elpensis: novajn fiŝistojn al

si dungi, kaj pri vi, kiuj estis en la ŝipkonstruejo, la monaĥoj decidis ne rememori. Prenos ni, ili pensis, novajn laborantojn, tiuj estos pli obeemaj. Kaj ne domaĝis laboron Atanazio Petroviĉ: ĉiujn fiŝistojn ĉirkaŭiris kaj ĉirkaŭveturis — kaj proksimajn, kaj malproksimajn, — avertante, ke ili ne dungiĝu en la monaĥejon, ne faru malbonon kontraŭ siaj fratoj, de la Blanka maro laborantoj. Neniu el ni dungiĝis al la monaĥejo, devis la ekonomo denove al vi riverenci...

Rjabov ekrigardis al Krikov, — tiu sidis mallevinte la kapon, ruĝa, rulante panerojn sur la tablo.

— Kaj rifuzis ni ĉiuj la monaĥejajn profitojn. Kien ajn la ekonomo monaĥeja direktadis siajn piedojn, tie oni sciis, kiel necesas fari, instruis Atanazio Petroviĉ! Jen kia li estas, Ataĉjo, dogana kaporalo!

Silentulo sidis nemalproksime de Rjabov, mallarĝigadis la okulojn al la kandela fajreto, pensadis sian penson. La maljunulo samojedo Pajga foriris dormi en la vestiblon, tute sufoke por li estis en la ĉambro. Stofo ne sufiĉis, ili devis ankoraŭ sendi iun al Magrulo.

Malstreĉiĝinte post la malsata vivo en la ŝipkonstruejo, multaj fiŝistoj en tiu tago ne ĝisiris sian domon: iu rampis sur la fornon — dormi, iu komencis kanton sen fino, iu ankoraŭfoje iris en la banejon — varmigi la ostojn ĝis la profundo mem. Avino Eŭdoĥa ŝmiradis ĉiujn per bona ŝmiraĵo el ursa graso, trinkigadis per malnova kaj fidinda pocio, infuzita kun ranunkolo, konsoladis, regaladis. La pordo en la domo de tempo al tempo frapadis, venadis najbaroj — iu kun pirogo, iu kun fungaĵo, iu kun acida vakcinio — por aŭskulti, konversacii, konsili. Taisja, laciĝinte, ekdormis, sidante sur la benko...

Matene ili sur multaj sledoj ekveturis en la monaĥejon. La tago estis serena, suna, ĉe la monaĥejo la dungitojn renkontis monaĥoj kun riverencoj, dece, respekte. En la provizejo estis primetitaj tabloj, la dungitoj eniradis po kvar, riverencadis al la ikonoj, riverencadis al la ekonomo, tiu benadis. La rudristo diradis nomojn de siaj homoj: jen al vi, patro ekonomo, reteltiristo, jen remisto, jen logaĵisto, kaj por rudri — benu min. La ekonomo faris decajn demandojn:

— La vojojn ĉu scias vi, rudristo?

— Scias, patro.

— Profundojn marajn, ondojn malicajn, ventojn rapidajn — ĉu scias?

— Tiel, patro, scias.

— Ĉu ĵuris vi al honestaj patrinoj fiŝistaj, ke dum vi estos viva, ne lasos fiŝistojn en la maro?

— Ĵuris, patro.

— Iru en paco!

Ili sidiĝis al tabloj — drinki je la granda interkonsento. Novicoj, mallevinte la okulojn, metadis sur la tablojn vodkon — laŭ la moro. La unua plado estis gado bakita, en butero kaj ovoj, post la gado oni donis navagon en kvaso kun cepo. La monaĥejo ĉi-foje ne avaris — la ekonomo ektimis, ke li tute restos sen laborantoj; la patro-ekonomo iradis laŭlonge de la tabloj, mem almetadis manĝaĵojn, karese edifadis la dungitojn, ke tiuj kun Dio en la animo prepariĝu al la fiŝado. La fiŝistoj silentis: hodiaŭ la ekonomo estas bona, sed kia li estos ĉe pagado?

Ili eliris el la refektorio jam vespere. Jam aperis steloj, denove venis frosteto. Kiam ĉevalo ektrotis laŭ la monaĥeja vojo, Semisadov malgaje diris al Rjabov:

— Nu, kio, rudristo Ivano Sabateiĉ? Ĉu finiĝis nia matrosa servo?

Rjabov ne respondis, mordante pajleron.

— Tiele, frato, — diris Semisadov, — finis ni brui. Ĉu ni pli kviete ekvivu, kiel vi pensas?

Silentulo respondis anstataŭ Rjabov:

— Kvietas arbostumpo, sed kio en ĝi estas?

5. Letero

La vojon al la monaĥejo kovris glatiso, sed printempaj rojoj jam sonore bruis en la pura malvarma vespera aero. Freŝa vento fajfetis en la oreloj, la ĉevaloj ronkadis.

Ĉe la monaĥeja pordego malalta soldato deĉevaliĝis, frapis per la boto. Patro pordegisto timigite ekrigardis al la ĉevalaj militaj homoj, demandis, por kio ili venis. Silvestro Petroviĉ ordonis malfermi sen prokrasto.

La prioro estis malsana, la neatenditajn gastojn akceptis Agafoniko. Li estis en subvesto, nur apenaŭ sukcesis surmeti sur la ŝultrojn subsutanon. En la ĉelo de la prioro estis sufoke, la aero odoris je fritita porkaĵo. Ievlev eksidis, ekparolis tuj pri la afero. Agafoniko pro timo kovriĝis per ŝvito, li eksvingis la mallongajn brakojn, komencis minaci per ĉefepiskopo Ĥolmogora Atanazio. Silvestro Petroviĉ interrompis:

— La afero, pro kiu mi venis en la monaĥejon, estas decidita je la nomo de la ŝtato. Marlaboristoj necesas en

Moskvo. Ke la monaĥejo el sia trezorejo pagis por tiuj homoj ŝuldojn kaj devojn, — tio estas afero bona kaj por la Diaj viroj estos opiniata merito por ĉiam. Do ni, patro, ne perdu nian tempon senutile, sed rigardu liston de viaj laborantoj, por ke ni povu kelkajn ankaŭ al vi lasi, kaj iujn sen ajna prokrasto laŭ la cara ukazo sendi al Moskvo...

Agafoniko kvietiĝis, donis folion. Silvestro Petroviĉ komencis skribi, kiu restos en laboroj en la monaĥejo, kiu iros servi al la caro. La ekonomo alkroĉiĝadis al ĉiu, diradis, ke la monaĥejo konsumiĝos, ke la monaĥoj falos en mizeron. Kiam la afero atingis Rjabov-on, la ekonomo serioze kriis. Ievlev koleriĝis, stamfis, Agafoniko ŝrikis. Ili disputis longe, finfine Silvestro Petroviĉ cedis: li pli bezonis ŝipajn ĉarpentistojn kaj majstrojn, ol rudristojn. Rjabov-on ili decidis lasi en la monaĥejo kiel brigadan rudriston. Semisadov, Longinov, Kopilov, Ĥagajo Pustovojtov kaj multaj aliaj estis destinitaj por Moskvo. Kun riverencoj forakompanante Ievlev-on ĝis la pordego, Agafoniko demandis, por kia celo la caro-patro bezonas homojn de la mara laboro. Silvestro Petroviĉ respondis:

— Tio, patro, ne estas nia afero...

— Antaŭnelonge fremdlandano kuracisto Des-Fontejnes diris, kvazaŭ ni kontraŭ la tataro militos...

Ievlev, akceptante el la manoj de la soldato la kondukilon, respondis kun malica rideto:

— La kuracisto, mi pensas, scias pli bone.

Kiam Silvestro Petroviĉ revenis hejmen, Apraksin sidis en sia kutima pozo ĉe la fajro kaj estis faranta matematikajn

kalkulojn. Du akramuzelaj hundoj kuŝis ĉe liaj piedoj. Supre, en la loĝoĉambro, nelaŭte kantis Manjo...

— Kvazaŭ birdo, — diris, ridetante, Teodoro Matejeviĉ, — dum la tuta hodiaŭa vespero ŝi kantas. Kaj tiel bone... — Li tiris al si ledan sakon, ĵetis ruzan rigardon al Ievlev, elprenis el la sako leteron.

— Legu!

Silvestro Petroviĉ malfaldis la folion, fiksrigardis al la saltantaj, malegalaj hastaj linioj de la cara letero:

«Ĉar scias via moŝto, per kiaj penoj en la nuna aŭtuno ĉe Koĵuĥovo dum kvin semajnoj en la Marsa ludo ni estis, en kiu ludo, kvankam tiam, kiam ĝi okazis, ni ankoraŭ ne estis ion intencantaj, tamen post la ties fariĝo komenciĝis alio, kaj la antaŭa afero montriĝis kiel antaŭsigno de la afero, pri kiu vi mem povas juĝi, kiomajn laborojn kaj penojn ĝi postulas, pri kio, se ni estos vivaj, poste skribos. El Moskvo al la servo ĉe Azovon ni iros ĉi monaton la 18-an tagon...»

Ievlev legis, Manjo supre kantis:

Vi ne faru neston, kamphirundo, en la alta dom',
Ja ne vivos vi ĉi tie kaj ne flugos...

— Ĉu vi legis? — demandis Apraksin.

Silvestro Petroviĉ silente kapjesis. Poste diris malgaje:

— Sed nin oni ne vokas...

— Vokos! — certe respondis Teodoro Matejeviĉ. — Se ne hodiaŭ, do morgaŭ, kaj se ne morgaŭ, do postmorgaŭ. Ni ankoraŭ militos sufiĉe, Silvestro. Tio ĉi estas nur komenco, kiel Perejaslavlo estis la komenco de la nuna ŝipa afero...

6. En la maron

En la maron la monaĥejaj laborantoj eliris tuj kiam la akvoj puriĝis de glacioj. Sur la barkoj ili levadis velojn, longe svingadis al la edzinoj, frostiĝantaj sur la bordo. Estis ankoraŭ malvarme, kun vento flugis pikaj neĝeroj.

Kiam la barko estis preteriranta la ŝipkonstruejon, Rjabov turnis la kapon al la nigraj grandaĵoj, al la ŝipoj, ĵus surakvigitaj.

Ĉe la albordiĝejo nigris «Sankta profetaĵo», «Paŭlo», «Petro» kaj ankoraŭ novaj ŝipoj.

— Jen kiom multe! — mallaŭte, kun admiro diris Rjabov.

— Floto! — flustris apude Demĉjo.

La urbo Arĥangelsko estis foriranta ĉiam pli malantaŭen, vento fajfetadis en la veloj. Iĝadis malvarme.

Rjabov turnis la rudron, surmetis la broditajn de Taisja pugnogantojn, mallarĝigis la okulojn, vigle ekkondukis la antaŭan ŝipon en la maron. Malantaŭe sur la barkoj oni ekkuris, levante la velojn. Kion estis faranta la brigadestro — Rjabov, tion komandadis ankaŭ la aliaj rudristoj...

— Ĉu tiele? — kriis de la masto Silentulo.

— Tiele, tiele! — kapjesis Rjabov.

Ĉe la baraĵo[82] la vento ekfajfis pli stride, la ŝipoj kliniĝis, ekiris rapide, kvazaŭ flugis. Demĉjo, lamante, aliris la rudriston, ekrigardis per gajaj brilaj okuloj, demandis:

— Ĉu bone, oĉjo?

---

82 Baraĵo *ĉi tie*: aluvio en la enfluejo de la rivero. *(trad.)*

— Bone! — ne tuj respondis Rjabov. — Kiel ajn estu penige, sed ne estas por mi vivo sen maro. Mi diros veron: foriris la niaj antaŭnelonge el la monaĥejo en foran militiron, al malproksima maro, oni diris — bati la tataron. Min oni ne prenis. Ĉu estas gaje resti? Sed nenion eblas fari — mi restis. Kaj hodiaŭ mi ekspiris, kiam la velojn ni levis. Mi nur ĉi tie spiras, dum en la urbo estas sufoke por mi, polve, enue...

Li rigardis malproksimen, kiel rigardas pomoroj — mallarĝiginte la okulojn, preskaŭ ne palpebrumante, per akra klara ruza rigardo. Senlima, grandega, en eta malica hulo disetendiĝis la maro, obtuze kaj minace avertante: «Gardu vin, homo, eĉ ne pensu kun mi konkuri!»

— Vidu! — diris Rjabov. — Timigas! Ĉu? Sed vi kaj mi ne estas timemaj, ĉu vere, Metrio? Kiel vi pensas? Ni ĝin jen kiel konas — la maron nian! Nin ne estas tiel facile venki...

Li silentis iom, rigardante tien, kie la ĉielo estis kuniĝanta kun la ondoj, poste demandis:

— Kaj kiaj estas tiuj maroj, Metrio, la Nigra kaj la Azova? Ĉu kiel la nia, aŭ pli bonkoraj?

Parto dua
Rusia floto estu

«Kaj jam ne vana aperis espero ke estos perfekta floto mara en Rusio».
Antaŭparolo al «Mara regularo»

Kiras', mantel'! Ni iras jam post hor'.
Kaj korn'! Kaj estu pura la pistol' —
Ĝi ne perfidu en batala bol'...
Por sturm' laŭ l' mano estu la ponard'...
Kaj nin sciigu la kanon-signal'
Ke venis nia tempo por batal'...
Byron

Ĉapitro unua

> Ĉar radiko de ĉiu malbono estas monavido, pro tio ĉiu komandanto devas gardi sin de maljusta profito... kaj tia komandanto, kiu havas multan lukson, ne multe pli bona ol perfidulo opiniata povas esti.
>
> *Petro la Unua*

1. Denove en Arĥangelsko

Pasis kelkaj jaroj.

En la lastaj tagoj de decembro de la jaro 1700, en malvarma, frosta nokto ĉe la pordego de la domo de la vojevodo Arĥangelska kaj Ĥolmogora princo Aleksio Petroviĉ Prozorovskij, kiu anstataŭis Apraksin-on, haltis leda sledkaleŝo, jungita per kvar ĉevaloj vice. Estis tre malvarme, en la ĉielo estis irantaj bluaj lancoj kaj glavoj de nordlumo, trans Dvino estis triste hurlanta luparo. Tataraj ĉevaloj en la sleda jungitaĵo movadis la orelojn, sur la okulharoj de la ĉevaloj, sur la oreloj, sur la implikitaj kolharoj brilis prujno.

En la sledo aŭdiĝis rido, moviĝo, poste el tie kun feltbotoj antaŭen elsaltis junulo en belaspekta peltjako, zonita per skarpo, kun sabro kaj pistolo, en oreluma ĉapo. Post li elgrimpis la alia — malpli alta, pli larĝŝultra, en ursa, por longa vojo, peltaĵo.

— Kial do vi ne frapas? — diris tiu, kiu estis en la peltaĵo, al la koĉero. — Ni frostiĝos en tia malvarmego. Frapu tuj!

La koĉero desaltis de la boko, ekiris frapi per la knuttenilo al la pordego.

— Jen revenis mi, Silvestro Petroviĉ, al mia domo, — diris tiu, kiu estis pli juna. — Kiom da jaroj pasis, sed la nordlumoj same ludas, kvazaŭ tute ne pasis tempo.

Ievlev silente fiksrigardadis la konstruaĵojn de la vojevoda bieno.

— Jen kiom konstruis por si Aleksio Petroviĉ, — rimarkis li kun moko. — Apraksin multe pli malriĉe vivis. Kaj tiu ĉi — kaj ĉambrojn novajn, kaj turojn, kaj ĉion ajn levis. Evidente, li bone sin nutras per la vojevodeco...

Al la koĉero nehaste aliris gardisto en grandega ŝaffela surtuto, kun halebardo. Demandis per trumpeta voĉo:

— Kiun Dio sendas?

— Al princo-vojevodo kun cara ukazo el Moskvo, — respondis Ievlev. — Ĉu ili mortis tie ĉiuj?

— Kial mortis? Nokto estas, tial dormas la homoj diaj. Vi apenaŭ sukcese frapos. La pordisto de la vojevodo estas iom surda, kaj aliaj servistoj — por ili estas tutegale, ĉu oni frapas aŭ ne frapas...

— Kaj se incendio? — demandis Ievlev.

La gardisto kolere kraĉis:

— Por kio vi Dion kolerigas?

Kaj li mem komencis frapadi per la stango de la halebardo al la pordego, farita el dikaj pinaj traboj. Poste aliris alia gardisto — same batis per stango. Trans la palisaro bojis hundoj, sed krome nenio estis aŭdebla.

Kvinope — la venintoj kaj la gardistoj — ili trovis grandan frostiĝintan ŝtipon, deŝiris ĝin de la tero, komencis bati per la ŝtipo al la pordego tiel, ke ekŝanceliĝis la tuta palisaro. Finfine ekknaris pordoj en la vojevoda gardista budo, maljunula voĉo kriis kun streĉo:

— Silenton! Vi la bojaran fortikaĵon faligos! Kiuj homoj vi estas?

Ievlev kun furiozo kriis, ke se oni ne malfermos tuj, li la palacon bruligos per fajro, ne nur la fortikaĵon faligos. En la pordego malfermiĝis pordeto. La venintoj eniris en la vestiblon; la bojara palaco spiris per forta, sufoka varmo, per odoro de zingibra pasto, per storako. Eksusuris, ekkuris blatoj, ronkado en la duono de la vojevodo ĉesis, la vojevodo — en subvesto, hirta, ŝvelinta pro dormo — eliris al la gastoj, preta stamfi al la arogantuloj, sendi ilin en la ĉevalejon, sub knuton. Sed Ievlev renkontis lin per tia feroca brilo de la malvarmaj bluaj okuloj, per tia severa alvoko, per tia malĝentileco, ke Aleksio Petroviĉ mem retropaŝis la unua, kaj ankoraŭ pli malalte, ol devis laŭ la rango, riverencis, ordonis porti al si ĥalaton, hejti la kuirejon, banejon, sterni por karaj gastoj lanugaĵojn kaj zibelajn kovrilojn...

— Satdormi ni ankoraŭ poste sukcesos, princo! — diris Ievlev. — Antaŭ ĉio bonvolu legi la ukazon de lia cara moŝto, senditan al vi!

Demetinte ledan sakon, pendintan maldekstre sur rimeno, Ievlev malfermis ĝin, elprenis oblikve deŝiritan, malpuran pecon de papero, sur kiu estis skribaĉitaj per la mano de Petro disiĝantaj malglataj linioj. La vojevodo prenis la ukazon, kisis, kriegis al servisto, ke tiu tuj donu la okulvitrojn. La servisto

kun lepora pepo — la vojevodo eksvingis al li — elkuris el la ĉambro kaj malaperis: okulvitrojn la princo ne havis, ĉiuj sciis tion, paperojn legadis al Aleksio Petroviĉ kancelariano Gusev. Diveninte la kaŭzon de la embaraso, Silvestro Petroviĉ prenis en la maldekstran manon kandelingon kun degelintaj sebaj kandeloj kaj ordonis al ĉiuj servistoj kaj vekiĝintaj hejmanoj eliri for. Kiam en la ĉambro restis nur tri homoj — la timigita vojevodo, Ievlev mem kaj lia oficiro, kiun li karese nomadis Jegorĉjo, — Silvestro Petroviĉ ŝlosis ambaŭ pordojn kaj nelaŭte, per firma voĉo, montrante tutan signifon de la caraj vortoj, legis:

«...kaj tial ordonis ĉe la urbo Arĥanĝela al bojaro princo Aleksio Petroviĉ Prozorovskij sur la malgranda rivero Dvino konstrui fortreson. Kaj tiun fortreson konstrui per de la urbo Arĥanĝela kaj la Ĥolmogora metiistoj kaj de ajna rango urbanoj, kaj per kampuloj de la caraj distriktoj kaj de la monaĥejoj, kies ajn ili estu, ĉar ni estas en antaŭtimo, ke la reĝo sveda Karolo grandajn plagojn faros al ni per sendo de militistoj per ŝipoj kaj galeasoj kaj galeroj tra la maro por ruinigo de la urbo Arĥanĝela. Kaj tiujn malamikojn en la Dvinan buŝon ne tralasu kaj la urbon Arĥanĝelan kaj la distrikton ne lasu ruinigi, kaj pri ĉio ĉi skribu ofte en la Novgorodan kancelarion...»

Silvestro Petroviĉ finlegis la paperon, faldis ĝin gardeme, etendis al la vojevodo. Prozorovskij, kiu jam estis preta al tio, ke la alveturinta oficiro venis por kapti lin kaj en katenoj veturigi al Moskvo en la Preobraĵenskan kancelarion[83] pro tro

83 Preobraĵenska kancelario (Преображенский приказ) — ŝtata organo, establita de Petro I, kiu okupiĝis interalie pri ŝtata sekureco kaj pri polico. Ĝia estro estis princo Romodanovskij. *(trad.)*

senceremonia «nutriĝado» en sia vojevodeco, — ne kredante al la oreloj, staris senmove, snufante per la mallonga kuspita nazeto. Poste, rekonsciiĝinte, li ektimis pli ol antaŭe: ĉu svedoj iras al Arĥangelsko?

— Ankoraŭ ne iras, — respondis Ievlev, — sed tre povas ekiri, por ke ĉi tie meti finon al la mara ŝipkonstruado kaj bloki Rusujon sen eliro en la Malvarman maron.

La bojaro oĥis, krucosignis sin, ekflustris sensence:

— Pri tio scias Dio kaj la cara moŝto...

La altkreska oficiro Jegorĉjo arogantege snufis al la ektimo de la princo, respondis kun moko:

— Kaj Dio scias, bojaro vojevodo, kaj la cara moŝto scias, kaj ni, pekuloj, tion ĉi scii bezonas...

Ievlev, tamburante per la fingroj sur la tablo, oscedetadis post la vojo, rigardadis flanken, al la murtapiŝo, ornamita per armiloj — madzoj, glavoj, arkebuzoj, sabroj, ĉasaj arĝente garnitaj pikstangoj, — jen kia armila riĉo estas ĉe la batalemulo-princo!

— Svedoj kontraŭ ni... militi! — ekkriis la princo. — Sed kiel ni, sinjoro, venkos ĉe nia mizereco, kie militistaron prenos, kanonojn, kolubropafilojn... Ĉu estas facila afero — fortreso! Kiel ĝin konstrui? Vi mem juĝu, komprenu: la svedoj kiom grandan damaĝon al ni faris ĉe Narvo. Kaj tie estis multege da nia militistaro, kiom da spertaj, gloregaj generaloj, mem duko de Croy...

Ievlev respondis kun trankvila malestimo:

— Tiuj generaloj kaj duko de Croy estis abomenaj

perfiduloj. Sen ili ankoraŭ ne estas sciate, per kio finiĝus la Narva batalo...

— Vidu, vidu! — ne aŭskultante, kriis la princo. — Vidu! Eĉ tiam ni estis frakasitaj plene, kaj ĉi tie, kiel estos ĉi tie? Ili batos nin, je Dio batos, kaj kun fortreso batos, kaj sen fortreso...

Li salte ekstaris de sur la benko, kovrita per diverskolora tapiŝo, surpaŝante la baskojn de la longa ĥalato kun lanuga subaĵo, ĵetiĝis al Ievlev, demandis flustre:

— Por kio ni bezonas ŝipojn? Ni vivis sen ŝipoj kaj vivos sen ili. Vi estas homo racihava, rusa, de nobela familio. Ĉu patro via la ŝipan aferon sciis? Avo? Praavo?

Ievlev same ekstaris, respondis nelaŭte, sed kun tia krueleco kaj tiel kolere, ke la bojaro ofte ekspiris kaj alpremis la manon al la koro.

— Mi la caran ukazon ne juĝos! — diris Silvestro Petroviĉ malrapide kaj klare. — Kio estis ordonita, tio estos farata — laŭvole aŭ kontraŭvole. Pri la floto estas aparta parolo, kiu alkreskis per postaĵo al la tero — tiun sur akvon eĉ per knuto ne eblas peli. Pri la fortreso ni parolos morgaŭ. Kaj ne pli poste ol post semajno al la konstruado iros la unua trajno kun ŝtono kaj cetera provizo. Se iĝos al mi sciata kontraŭagado al la afero, por kiu mi venis ĉi tien, mi senprokraste skribos en la Novgorodan kancelarion kaj al princo-cezaro Romodanovskij, por ke ĉi tie oni por ĉiam forgesu eĉ pensi antaŭ la svedo sin klini. La princo-cezaro scipovas spinojn rompi, li kontraŭulojn ne unuafoje bruligos per fajro...

Prozorovskij preskaŭ svenis, eksvingis al Ievlev la manojn:

— Kion vi diras, kara! Mi ja ne pri mi temas, pri la popolo. Kiel la popolo inter si parolas, tiel ankaŭ mi. Ĉu mi povus aŭdaci en mia mizereco? Ĉu mi rajtas rezoni? Vere, vere pri tio scias Dio kaj la cara moŝto...

Ievlev ne respondis, regalon kaj banon rifuzis, foriris dormi.

Aleksio Petroviĉ, ĝemante, almetiĝis al la edzino, princino Eŭdokia, sub varmegan plummatracon, ekflustris, teruriĝante pri la veno de la neatenditaj gastoj kaj ĝismorte timigante la edzinon:

— Kiu? Antikristo, je Dio Antikristo. La okulegoj estas diablaj, la muzelo blanka, sen guto da sango, mem tuta per tabako nikotiana odoraĉas. El tiuj, kiuj trans la maron, en la fremdujon kun li, kun la diablo globokula, iradis, herezulo, preskaŭ per sulfura flamo brulas. Mi al li, damnito, diras kaj tiel kaj ĉi tiel, li nenion aŭskultas...

— Ja kio estas, ho Dio, — sufokiĝis pro teruro la princino, — ne komprenas mi, vi klare, laŭ ordo klarigu, princeto...

— Stulta vi bovaĵo! — koleris la vojevodo. — Komprenu, bovinaĉo! Kontraŭ la svedo al ni estas ordonite per nia mizereco defendiĝi, fortikaĵon konstrui. Mi lin, Herodon, petegis pri indulgo, sed li eĉ aŭskulti ne deziris, per brutalo Romodanovskij, per la Preobraĵenska kancelario, per torturo minacas. Ve al ni, edzino, pereis ni nun, atingis ankaŭ nin la mano de li, de la malbenito...

Eŭdokia ektremis, malfermis la buŝon ĝis la oreloj:

— Ĉu li mem venis? La Siro?

— Ho, Dio! — en tristo ekkriis la vojevodo. — Ŝtipo, malfeliĉo mia, aliaj havas edzinojn, sed mi arbostumpon... Vin

mi ne kompatas, mortaĉu, — la infanetojn karajn mi kompatas: en malriĉeco, per terura morto finos ili siajn vivojn. Kaj ne hurlu, ratino abomena, ĉit, aŭdos la satano, antikristo...

Sub monotona susurado de blatoj, viŝante per mantuko ŝviton, obtuze rigardante al la muro, la vojevodo plendadis:

— Helena apostato, diomalplaĉajn sciencojn ordonas al ĉiuj gurdi, — kie oni tion aŭdis? Herezajn librojn al ĉiuj estas ordonite scii, en la gehenon, en la inferon li mem bonulojn puŝas! Diras homoj: en Moskvo en ajna tago estas maskerado, demonajn muzelojn super siaj skrapitaj ili metas, diablajn dancojn dancas, rampuloj, kaj bestoj, kaj birdoj...

— Oj, ne komprenas mi, ne komprenas, neniel komprenas! — plendadis la princino. — Kion vi rakontas — ne komprenas...

— Ne al vi, al la blatoj mi diras, ne estas aliaj, al kiuj diri...

Kaj li plue balbutadis:

— Mallaŭdanto, kontraŭdiulo, babilonan sodomon faras, eminentajn gentojn malhonorigas; kiel komencis kapojn forhaki, halti, diablo, ne permesas, svingas hakilon, hundo globokula, kaj ni ĉiuj tremegas senĉese...

Li leviĝis, ĵetis la mantukon, ordonis:

— La trezoron ni kaŝos, ekstaru, lardo krurhava!

En falanta de sur la grasa ventro subpantalono, kudrita el kara bunta persa damasko, en skufio sur la kalva kapo, ŝvita, kolera, princo-vojevodo snufante trenis de sur la loko garnitan per kupraj bendoj pezan kofron, tiris feran ringon, grimpis en subplankejon, kie estis konservata la trezoro... Super la

malkovrita luko estis akceptanta sakojn kaj korbojn princino Eŭdokia. Longe, ĝis mateno, malhelpante unu la alian, erarante, rekomencante, ili kalkuladis, kio akumuliĝis dum la longaj jaroj da vojevodeco en Nigra Krutaĵo, Kamiŝino, Kolomno, Novgorodo, Saratovo, Muromo, Azovo, kio estis prenata per depagoj enveturaj, festaj, kio estis eltrudata el la popolo pro murdita korpo, pro ĵetkuba ludo, pro vinfarado, kio estis prenata helpe de denuncistoj, kion alportadis ĝismorte timigitaj bonvolaj donantoj — donacojn, subaĉetojn, por kandeloj por Dia templo, por kristanaj orfoj, kio estis elŝirata el la plebo per ajnaj fiaj rimedoj, per kiuj vojevodis bojaro princo Prozorovskij.

Ili kalkuladis hungarajn malhelajn ĉervoncojn, kalkuladis gajajn holandajn, florencajn, polajn dukatojn, anglajn ŝipmonerojn kun bildo de ŝipo, glavo kaj ŝildo, rekalkuladis grandegajn helajn portugalajn monerojn kun krucoj, imperiajn talerojn, rupiojn, guldenojn, sterlingojn. Ĉio estis en la trezoro de Prozorovskij, ĉion prenadis la vojevodo dum la longaj tagoj de sia «nutriĝo». Jam la suno elruliĝis, frosta kaj ruĝa, kiam el la vojevoda korto sataj fortikaj ĉevaloj elportis bojaran sledon kun la trezoro, sigelita en artifika kofro de fremdlanda laboro. Sur la kofro sidis la vojevoda filo — nobelido Borisĉjo, maĉis pirogon kun sturga ĥordo, kunpremadis sub la peltmantelo tranĉilon, por bati ajnan ŝteliston, kiu ŝoviĝos al la bojara havaĵo. La trezoron estis ordonite veturigi en la Nikola-Korelan monaĥejon — por konservado ĉe la prioro. Borisĉjo estis veturiganta al la prioro ankaŭ leteron, skribitan sub diktado de la princo — per duonuncialo. La leteron skribis la nobelido, sed ĝi estis kunmetita tiel, ke Borisĉjo en ĝi tute nenion komprenis.

Forakompaninte la nobelidon, la vojevodo ordonis doni al si brasikon kun oksikoko kaj duonstofon da malvarmigita vodko. Post ioma tempo li revigliĝis kaj rekuraĝiĝis, rezonante, ke ne tiom li estas simpla kaj timema, en Azovo ja oni pli malbone timigadis, sed ne sukcesis. Kaj la cara favoro estis kun li, la globokululo en tiuj tempoj tre favore lin traktis kaj levis, nomis lin same fidela al si, kiel la fremdulo Franz Lefort...

Sed dumaano Larionov kaj kancelariano Molokojedov portis al la bojaro tiajn novaĵojn, ke Aleksio Petroviĉ ree tute konfuziĝis: en la hodiaŭa nokto sur la Dvina glacio, nemalproksime de la Komerca korto, sennomaj maliculoj per tranĉilo murdis serviston de la vojevodo Andreĉjon Sosnovskij-on...

— Andreĉjon? — balbutis la bojaro.

— Andreĉjon, princo, — firme diris dumaano Larionov, kiu ĉiam ĉion diradis firme. — Mortigis ili la serviston. La frosto estas forta, do li glaciiĝis dum la nokto tute. Kvazaŭ lignaĵo...

— Andreĉjo? — ree demandis la bojaro.

La dumaano facile puŝis la kancelarianon per la kubuto, por ke Molokojedov notu la ektimon de la princo. Molokojedov suspiris.

— Andreĉjo, Andreĉjo, — konfirmis la dumaano. — Entute, mi diras, li glaciiĝis. Kaj montris la dentojn...

— Jen tiele! — demonstris Molokojedov, kaj mem montris la dentojn eĉ pli timinde, ol la mortinta Sosnovskij. — Tute... per tranĉilo...

— Ĉu oni lin prirabis?

— Se prirabus — estus klare, — eldiris Larionov, — se prirabus — la afero estus simpla...

— Ĉu ne prirabis?

— Neniom. Kiu mono estis ĉe li — la tuta restis.

— La ĉapon eble oni demetis? — kun espero en la voĉo demandis la bojaro.

— Por kio? Ankaŭ la ĉapon oni ne prenis. La ĉapo estas kun li, la pugnogantoj, la peltjako de via dorso, kiun vi pro bona servo kaj denuncoj donacis, la zono metalplata...

La princo eksnufis, verŝis al si ankoraŭ vodkon, eltrinkis sen almanĝo. La dumaano, tremigante la maldikan kruron en akrapinta boteto, diradis kategorie, kaj pro ĉiu lia vorto ĉiam pli hororiĝadis la vojevodo:

— Pro Azovo lokaj latronoj lin tranĉmurdis, ne alie. Eksciis la malamikoj, ke li, Andreĉjo, al vi denuncis en la kancelario pri tieaj pafistaj ribeluloj. Li mem, Andreĉjo, antaŭ nelonge al mi diris, ke kvazaŭ vidis li ĉi tie, en la Arĥanĝela urbo, unu el Azovo fuĝintan pafiston. Tiu pafisto lin, Andreĉjon, rekonis kaj sakris al li, kaj rememoradis, kiu pro li, pro Andreĉjo, torturon ricevas, kaj ankoraŭ vortojn diradis insultajn kontraŭ vi...

— Kontraŭ mi?

— Ke kvazaŭ vane oni vin en Azovo sur lancojn ne levis, ke vi kaj la fremdulo-fraĉo Leforto estas unu sama satano, ke vi ambaŭ ĵuris rusajn homojn ekstermi, ke la popolo nenion forgesis, kaj ĉiujn perfidajn nomojn al li, Andreĉjo, tiu fuĝulo diris: arestitaj estis, laŭ li, pro via denunco — hundo vi, diablo, satano! — el la pafista regimento Jaĉjo Ulesnev, kaj skribisto

Kindjakov, kaj monaĥo Dij. Scias tiu pafisto fuĝinta, ke vi, vojevodo, Kosĉjon Rudnev-on kaj Serĉjon Lopatin-on sendis en la monaĥejon de Jonano la Baptisto en Azovo — ekscii, kion tiu Dij diras ribeligan...

— Estis, estis tio, — rapide eldiris la bojaro. — Ĝuste ili eksciis...

— Eksciis, sed nun en la mondo ne vivas...

— Kiel?

— Batis ilin, princo, iuj homoj. Kaj poste — ŝtonon sur la piedojn, kaj en akvon. Longan memoron al ili — al Serĉjo kaj Kosĉjo. Kaj ankoraŭ diris tiu pafisto, ke venos Andreĉjo al ili — ke, laŭ li, tiu preĝu kaj antaŭ la morto ne peku...

— De Azovo ĝis Arĥangelsko, — mallaŭte diris la bojaro, — ĝiskuris la informo. Kien saviĝi, Dio?

La dumaano ankoraŭ foje puŝis la kancelarianon. Molokojedov elŝoviĝis, konsilis:

— Enketon indus nun komenci, kara princo. Ĝusta tempo nun estas, sur varmaj spuroj. Bonorde, kiel en Azovo ni faradis. Per knuto, kaj per torturo, kaj per fajro — ĉion ni tiel ekscius...

— Preni la latronojn necesas, — diris dumaano Larionov. — Ĉiujn aresti, kaj tiam kun Dio ankaŭ torturi... Kaj vi, Aleksio Petroviĉ, ne afliktiĝu, longe paroli ĉi tie ne necesas. En Azovo iam vi tute svenis, kiam eksciis, ke la pafistoj vin sur lancojn levi intencis, sed poste ĉio tute bonege aranĝiĝis. Kaj la Siro pri vi estis kontenta, favoris, kaj vi mem grandan forton ricevis. Vin nun per mano ne eblas atingi. Vi mem pensu: de Leforto forpasinta sangon la pafistoj deziris, vin mortigi, kaj la Siron. Vidu, kiele... Sekve, ĝuste vi estas la plej fidela servanto

al la Siro...

— Tiele, tiele, — diris la vojevodo nedifinite, — sed oni povas iam incendion fari...

— Pro incendio vi ne malriĉiĝos. La caro-patro ne forlasos... Kaj ĉi tie ni kun la kancelarianoj ne prokrastos. La fuĝulon ni trovos, kaj, preĝinte, komencos torturi. Post torturo multo malkovriĝos: la popolo estas libera, senservuta, Andreĉjon murdis, pli bona komenco ne necesas. Ĉu vi ordonas?

— Mi ordonas! Sed kun utilo faru...

— En ĉi tagoj ni komencos aresti.

Forakompaninte dumaanon Larionov-on kun la kancelariano, la princo ree peze sidiĝis sur la benkon kaj enpensiĝis. La teruro, kiun li spertis en Azovo en la tagoj de malkovro de la tiea komploto, denove kun la antaŭa forto kaptis lin plene. Sovaĝe kaj suspekteme ĉirkaŭrigardante, li eksnufis, vokis la majordomon, flustre ordonis al li fari en la tuta domo kverkajn riglilojn, instali fremdlandajn artifikajn serurojn, sub la fenestroj kaj ĉe la perono konstante teni fidelajn gardantojn. La majordomo — maljunulo Jegoriĉ, prenita ankoraŭ en Azovo, — same ektimis, demandis, spirante al la bojaro per ajlo:

— Ĉu vere denove rekomenciĝis?

— Kvazaŭ rekomenciĝas.

— Ĉu oni mortigi vin intencas?

— Intencas, Jegoriĉ...

— Ankaŭ mi mem tiel rezonis: Andreĉjon oni murdis, estos malfeliĉo...

La bojaro por ajna okazo mensogis al la majordomo:

— Vi pri tio silentu, tamen mi veron diras: mortigos oni ne nur mian familion, sed ankaŭ servistojn ĉiujn ĝis la lasta. Vi — gardu vin. Kiu sin gardas, tiun Dio gardas. Atentu en la ĉambroj, ĉiun homon observu, aŭskultu parolojn en la domo, en la tuta bieno...

Jegoriĉ skuis la maldensan barbeton, diris malmilde:

— Esperu, princo-bojaro, en Azovo ni ne perfidis, ĉi tie ni sekurigos. Vi por ni estas patro, ni estas viaj infanoj...

Kaj foriris per sia malpeza, neaŭdebla, rapida maniero.

La bojaro iom pensis, suspiris, ĉe la ikonujo falis sur la genuojn, komencis preĝi, ke li ne mortu per malica morto, ke li kaptu la maliculojn, ke al li estu bono, kaj al la malamikoj — kruela puno.

2. Multe da akvo fluis

Ievlev vekiĝis malfrue: nokte li vidis la saman sonĝon, damnitan, konstantan sangan sonĝon. Estis sensone naĝantaj, kliniĝante sur kavoj kaj holmetoj, malgrandaj ĉaroj, en tiuj ĉaroj sidis po du ekzekutotoj, fermante per la diafanaj polmoj flametojn de adiaŭaj kandeloj, kvazaŭ la flamo de kandelo estus la vivo. La ĉaroj naĝis senfine, kaj ŝajnis, krevos la koro pro sufero, ne eblas elteni, toleri ĉi vidaĵon. Kaj tio, ke estis en la sonĝo neniaj sonoj, kaj tio, ke Petro same aperis en silento, tiel malpropra por lia ĉeesto, kaj tio, ke li estis etendanta al li, Silvestro Petroviĉ, la «toporon» — la faman ekzekutan hakilon de la princo-cezaro, kaj tio, ke li, Ievlev, ne povis preni la

toporon por haki kapojn, kaj ebria Menŝikov kun frenezaj diafanaj okuloj, kiu estis ĉiam ien iranta, flustrante kaj plorante, — ĉio ĉi estis tiel neeltenebla, ke Silvestro Petroviĉ vekiĝis tute rompita kaj longe kuŝis senmove, reviziante en la memoro tiujn sovaĝajn tagojn. Kaj ree, jam centan fojon, li kun furiozo rememoradis la senzorgan vizaĝon de Lefort kaj senfinajn balojn, kiujn li donadis dum la damnitaj tagoj de la ekzekutoj...[84]

Estis aŭdeble, kiel en la vestiblo antaŭ la ĉambro Jegorĉjo mallaŭte interparolas kun iu. Poste li subite kun ĉagreno insultis, mallaŭte malfermis la pordon.

— Kio estas tie? — demandis Silvestro Petroviĉ, intence oscedante.

— Mi jam pensis, ke ekmalsanis vi, sinjoro Ievlev, — diris Jegorĉjo, — tiele vi kompatige dum dormo vortojn diradis...

— Oni hejtis troe, ke ne eblas spiri! — kolere respondis Ievlev. — Kion oni diras?

— Multon oni diras. En la hodiaŭa nokto bojaran servutulon sur Dvino oni tranĉmurdis...

— Pro kio?

— Ja oni diras, laŭmerite.

— Sed pro kio ja?

---

84 Temas pri eventoj de la ribelo de la pafistoj (Стрелецкий бунт), okazinta en 1698 dum foresto de Petro I pro lia Granda Ambasado eksterlande. La ribelo estis subpremita fare de la armeo sub gvido de Franz Lefort kaj Patriko Gordon. Reveninta el eksterlando Petro post la subpremo de la ribelo ukazis pri enketo kaj mem partoprenis ekzekutojn, kiuj daŭris kelkajn jarojn, entute en 1698 estis ekzekutitaj pli ol mil pafistoj. *(trad.)*

— Diverse oni babilas, Silvestro Petroviĉ! — eviteme respondis Jegorĉjo. — Vi mem scias, la popolo. Kion de ili postuli. Kaj ankoraŭ estas tiaj novaĵoj, ke la tuta urbo Arĥanĝela jam certe scias, kiel necesas gardi nin de la svedo kaj ke ni konstruos fortikaĵon.

Ievlev eksidis en la lito:

— Ĉu vi veron diras?

— Ekde la naskiĝo mi ne mensogis, Silvestro Petroviĉ. Kaj verdire...

Li ne findiris, svingis la manon.

— Vi findiru. Kio — verdire?

— La bojaro nuna, Aleksio Petroviĉ, de Azovo ĉi tien venis. Ne bone tie okazis. Lin kvazaŭ sur lancojn la popolo levi deziris...

— Tio estas ne via afero! — diris Ievlev.

Jegorĉjo subridis kun tia aspekto, ke li ankaŭ mem scias, kies tio estas afero.

Ievlev silente vestis sin, lavis sin el arĝenta kruĉo, komencis matenmaĝi samtie, sidante sur la lito. Jegorĉjo dum la manĝado rakontis:

— Dum vi dormis, mi la tutan urbon trakuris. La fraton vidis — Ĥagajon. Nun li estas ĉe ŝipo. Semisadov, kiu en Moskvo galerojn konstruadis, kaj poste al ni en Voroneĵon veturis kaj ĉe Azovo estis, — ĉu vi memoras, Silvestro Petroviĉ, lian kruron tie kuglego deŝiris, — same estas viva, sur lignaĵo lamas. La konstruistoj ŝipaj — la maljunulo kaj la alia, Koĉnev Timoteo, estas ĉi tie, en la ŝipkonstruejo...

— Rjabov-on ĉu vi trovis? — demandis Silvestro Petroviĉ.

Jegorĉjo prokrastis respondon, Ievlev atente ekrigardis al li.

— Ĉu ne vidis lin?

— Dronis la rudristo, — mallaŭte diris Jegorĉjo. — Ne estas plu en la mondo Ivano Sabateiĉ. Prenis lin la maro.

— Ĉu vi freneziĝis? — levis la kapon Ievlev. — Kiel la maro prenis? Kiam?

— Jam kiam ni kun vi tiam estis forveturantaj al Kopenhago — li nin akompanis, estis gaja, ĵus al li fileto naskiĝis, oni baptis lin Ivaĉjo, vi ja estis la baptopatro, — ĉu vi memoras?

— Sed vi la aferon diru! — kolere diris Ievlev. — Ĉu memoras, ĉu memoras! Mi ne estas maljuna inaĉo, memoras... Poste do kio estis?

— Kaj poste estis tio, ke foriris li sur oceana barko al malproksima ĉasado kaj ne revenis. Vidviĝis Taisja Antipovna...

Silvestro Petroviĉ viŝis la manojn per tuko, krucosignis sin.

— Longa al li estu memoro, al la mara laboristo. Li estis homo de granda koro. Mi bedaŭras. Li povus iĝi vera flota maristo. Fremdlandanojn ni per rangoj flotaj kaj per mono pridonacas, sed niaj propraj bonuloj — pro pano, pro nutro pereas...

Ili longe silentis. Silvestro Petroviĉ iradis en la ĉambro, pensadis. Diris per alia, milda voĉo:

— Ĉiujn maristojn-fiŝistojn, kiuj ne estis prenitaj sur ŝipojn, jam hodiaŭ kolektu ĉe mi. Kun Semisadov konsiliĝu, kun via frato Ĥagajo, kun la majstroj ŝipaj, kun Koĉnev, kaj ankoraŭ

kun la maljunulo, kun Ivano Kononoviĉ...

— Sed kien kolekti do? — demandi Jegorĉjo. — Ĉi tie ĉe la bojaro estas kvazaŭ tino krevinta: ĉion, kion vi diros, oni aŭdos, kaj kien ne necesas disportos...

Ievlev kapjesis, — Jegorĉjo diris saĝe.

— Kaj mi tiel al mi pensis, — daŭrigis Jegorĉjo, — ĉu ni loĝiĝu ĉe Taisja Antipovna. La maljunulo Timotejev ja mortis, ilia domo estas pura, vasta, kaj da loĝantoj estas nur tri — la vidvino mem, la filo Ivaĉjo kaj la fiŝista avino Eŭdoĥa. Kion vi donos pro la loĝado — ĉio al la vidvino utilos, — ili malriĉe vivas, tre. La maljunulo nenion al ŝi lasis, ĉion al la monaĥejo testamentis, por preĝado postmorta. Nur la tegmento super la kapo estas...

— Sed ĉu akceptos ŝi? Mi kaj vi estas homoj malkvietaj.

— Kiel ne akcepti, Silvestro Petroviĉ. Vi estas la baptopatro — ne eblas ne akcepti. Kaj loĝado por vi estos — vi nur ĝojos. Pri nenio pensi necesos. Tiaj mastrumantinoj raras.

Ievlev subridis, tiris Jegorĉjon je la molaj linaj haroj, karesis gaje:

— Ĉiam vi min instruas, ĉiam vi min instruas, kia instruisto troviĝis. Bone, paku nian havaĵon kaj ordonu jungi la sledkaleŝon.

Eksciinte, ke la cara sendito transloĝiĝas, bojaro Aleksio Petroviĉ koleriĝis kaj konfuziĝis, kriis al la hejmanoj kaj servistoj:

— Senhonorigas li min, bojaron, mian gastamon abomenas, nu bone, li memoros, bravulo!

Sed tuj ordonis al princino Eŭdokia kaj al la princidinoj, tro longe restantaj fraŭlinoj — riverenci, peti ne fari amaran ofendon, ne ĉagreni la bojaron-vojevodon. Nome de la tuta familio parolis komplimentojn la hejma kuracisto de vojevodo Prozorovskij — fremdlandano kun senmova rigardo kaj malhela vizaĝo Des-Fonteines. La hejmanoj profunde riverencadis, ekkriadis kompatige:

— Ne faru malkonkordon, sinjoro Silvestro Petroviĉ, indulgu!

La maljunaj fraŭlinoj, skuante pudritajn perukojn, ricevitajn senmone de fremdlandaj ŝipanoj, faradis al Ievlev galantaĵon, eksidadis, dismovadis la nudajn vejnajn brakojn, lispadis:

— Aĥ, aĥ, *chevalier*, ne forlasu nin orfaj, ne lasu nin en malhonoro, ni, fraŭlinoj, vin same pri tio *je vous prie*...

— Ĉu nia *château* por vi estas malŝatata? Ĉu vi ne donos al ni ĉi plezuron? Ho, *chevalier*, ne transvivos ni ĉi malfeliĉon...

Silvestro Petroviĉ, kaŝante rideton pro la afektado de tiuj fraŭlinoj, pro ilia konfuza franca lingvo kaj pro la hararanĝo de princino Eŭdokia, farita de ŝi por la gasto laŭ nova modo sur fibroj kaj vaksitaj ĉifonoj, respondis ĝentile, kun riverenco, ke li transloĝiĝas nur por ne ĝeni la altestimindan familion, ke li estas tre danka pro la boneco kaj gastamo kaj estas kortuŝita per montro de amikaj al li sentoj. La damoj kun ekkrioj, similaj al tiuj sonoj, kiuj aŭdiĝas el malkvietigita kokejo, akompanis lin ĝis la malvarma vestiblo, la princo-vojevodo, peze spirante, eliris sur la peronon, dumaano Larionov kaj la kancelariano laŭ la rango helpis la caran oficiron eksidi en la sledon. La koĉero knutis la timonĉevalon, ekŝrikis sur la frosta neĝo la glitiloj, la malkvieta gasto forveturis. En la korto tuj iĝis tre mallaŭte. La

dumaano per firma voĉo diris:

— Nia ja ĉefo, videble, forte timigita estas de la Andreĉja morto.

— Ŝajne jes, — konsentis Molokojedov.

— Nun li eksidos en la palaco senelire. Kaj eĉ ne necesas, ke li en la kancelario sidu. Ĉiuj donacoj al li iras. Eĉ kokidon li ne malakceptas, ne nur monon. Li tremu kaj preĝu, por ni estas profito...

— Pekoj niaj! — diris la kancelariano. — Frosto hodiaŭ estas, Ivano Simoniviĉ. Ĉu ni iru en la domon? Malvarmumos ni, ne donu Sinjoro!

Kaj la dumaano kun la kancelariano ekiris en la servistejon — vespermanĝi.

3. Saluton je ĉiuj kvar ventoj!

Taisja renkontis Silvestron Petroviĉ-on silente, riverencis malalte.

Dum la pasintaj jaroj kvazaŭ maturiĝis ŝia fiera beleco: ne tiom intensa estis nun la vanga ruĝo, ne ofte brilis per subrido la okuloj, en ili staris glata, kvieta brilo. Ŝi jam ne ridis sonore, kiel antaŭe, — afabla, bonkora rideto lumis sur ŝiaj lipoj. Nun sur ŝi estis nek orelornamaĵoj, nek fingroringoj, pri kiuj ŝi tiel ĝojis en la antaŭaj jaroj, sed ankaŭ ion vidvinan, amaran, orfan ne rimarkis Silvestro Petroviĉ en tuta ŝia aspekto. Se ne scii pri la morto de la rudristo, — verŝajne, laŭ la aspekto de Taisja oni pri nenio divenus: tia malfeliĉo okazas profunde, ne eblas rekoni ĝin tuj, ne distingos ĝin indiferenta rigardo. Sed Ievlev

estis ne fremda al la forpasinta Rjabov kaj tuj ekvidis, ke Taisja nun estas tute alia, ol en tiuj malproksimaj tagoj, kiam Silvestro Petroviĉ, forveturante kun aliaj tablestroj al transmaraj landoj, baptis ĉe Ivano Sabateiĉ tiun Ivaĉjon, kiu en botetoj kaj brodita ĉemizeto staris nun apud la patrino kaj trankvile, per ruzeta, patra maniero rigardis al la nekonata oficiro kun spado.

— Ĉu estas li — mia baptofilo? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Li! — respondis Taisja, kaj esprimo de speciala patrina fiero prilumis ŝian vizaĝon.

— Nu, saluton! — diris Ievlev al la knabo.

— Saluton je ĉiuj kvar ventoj, se vi ne ŝercas, — per voĉo, plena de digno, kaj sen riverenco respondis la infano al Ievlev, kaj iĝis terure, — tiel rememoriĝis Rjabov mem en tiu horo, kiam li ne deziris riverenci al Apraksin sur holmeto ĉe Dvino kaj kiam li ne riverencis al Petro Aleksejeviĉ mem.

Kaŝante la emocion, Silvestro Petroviĉi paŝis antaŭen, impete, per fortaj manoj levis la knabon al la plafono kaj, rigardante al li demalsupre, kun ĝoje batanta koro pensis: «Ho Dio, kion ne povas fari tia popolo, kaj kion ne eblas fari por ties gloro kaj por honoro de la rusa nomo!»

Kisinte la knabon al la frunto, li starigis lin sur la plankon, prenis lian manon kaj ordonis:

— Nu, konduku, mastro, en la ĉambron.

La knabo kondukis. Renkonten de sur benko leviĝis larĝŝultra kaporalo kun konata vizaĝo, sinĝene surmetis sur la tablon tranĉileton kaj muelejon, kiun li estis lerte faranta el ligneroj. Ievlev fiksrigardis — rekonis: tio estis la

malpromociita en antaŭaj jaroj oficiro de la doganejo Atanazio Petroviĉ Krikov. Pro la tempo kvazaŭ severiĝis la vizaĝo de la kaporalo. Li staris en atentopozo, levinte la kapon. La enirinta maristo kun granda rango de kapitan-komodoro[85] etendis la sekan, varmegan manplaton, proksime rigardante en la okulojn, diris:

— Saluton, Atanazio Petroviĉ. Mi ĝojas vidi vin!

— Kaj mi al vi ĝojas! — simple respondis Krikov. — Ĉu vi en bona sano venis? Kiel veturis? Da lupoj ĉe ni nun estas multege...

Silvestro Petroviĉ respondis ĝentile, riverencis al avino Eŭdoĥa, kiu estis per ĉifono viŝanta eĉ sen tio puran benkon por la gasto, gaje pririgardis la ĉefĉambron, en kiu estis pepantaj, klakantaj kaj fajfantaj birdoj, verdis en potoj kaj kestoj herboj kaj malgrandaj arbetoj, demandis Ivaĉjon, kiel kio nomiĝas el herboj kaj birdoj, poste eksidis kaj donis al la knabo la spadon — por pririgardo. Krikov ĉiam ĵetadis rigardojn al Silvestro Petroviĉ, tiu demandis:

— Kial vi rigardas, sinjoro Krikov? Ĉu ŝanĝiĝis mi?

— Ŝanĝiĝis, Silvestro Petroviĉ. Estas peko. Estis vi, pardonu la veron, junulo, sed nun vi estas viro. Evidente, atingis la aĝon...

Ievlev subridis:

— Ja ankaŭ vi ne juniĝis, sinjoro Krikov...

---

85 Kapitan-komodoro — rango en la rusia floto super veselkapitano, sed sub kontradmiralo (komodoro), respektiva al armea rango de brigadestro (inter kolonelo kaj generalo). Ambaŭ rangoj nun ne ekzistas en la rusiaj floto kaj armeo. *(trad.)*

Ivaĉjo, elŝovinte la langon pro streĉo de ĉiuj siaj fortoj, eltiris finfine la spadon el la ingo, fanfaronis al Krikov:

— Vidu, oĉjo Ataĉjo, — spado! Se vi havus tian...

La bruna pro frostoj kaj ventoj vizaĝo de la kaporalo tremeris. Ivaĉjo tuŝis la plej doloran lokon, — li ne trovis, kion respondi. Anstataŭ li respondis Ievlev:

— Havos ankaŭ oĉjo Ataĉjo spadon, havos, infaneto...

Taisja ekbrilis, komprenis. Atanazio Petroviĉ, por kaŝi emocion, kaptintan lin, ree komencis raboti lignerojn por la estonta muelejo. Silvestro Petroviĉ demetis de la muro fajne faritan kadreton, legis la malnovan pergamenon en ĝi. Tio estis gratifika papero de caro Ivano Bazilieviĉ[86], donita de li al rudristo barka Rjabov Ivano Sabateiĉ por navigado al ĉiuj maroj kaj teroj — ĝis la Angla kaj Roma...

— Ĉe avino Eŭdoĥa ĝi konserviĝis, — klarigis Taisja, ekvidinte nekomprenon sur la vizaĝo de Ievlev. — De mia forpasinta Ivaĉjo kaj la patro, kaj la avo, kaj la praavo — ĉiuj en forajn marojn iradis, kaj ofte. Ili baptiĝis Sabateoj, aŭ Ivanoj, kaj ankoraŭ Teodoroj. Tiele ĝi restis: Ivanoj, Sabateoj, Teodoroj Rjabov-oj. Pugnogantoj liaj malnovaj estas — sub la ikono pendas, kaj portaĵo — saketo fiŝista tiel nomiĝas en nia maniero, simpla. Krom tio estas nenio...

— Vadbotoj estas ankoraŭ de la paĉjo en la ŝedo! — rememorigis Ivaĉjo. — Sed ili estas truitaj, ne taŭgos por vi, oĉjo...

Ievlev subridis, altiris la knabon al si, rigardis en liajn verdajn kun fajreroj okulojn, demandis mallaŭte:

---

86 Ivano (Johano) IV la Terura (1530–1584) *(trad.)*

— Kaj vi kiu estos, batalisto?

— Fiŝisto mi estos! — elturniĝante el la manoj de Silvestro Petroviĉ, diris Ivaĉjo. — De la mara afero laboranto, jen kiu!

— Vi timos! — diris Ievlev. — Ĉu vi sukcesos? Maro — ĝi estas komplika!

— Ankaŭ mi ne estas simpla! — respondis la knabo. — Min jen oĉjo Ataĉjo sur la doganistan barkon prenis, ni en la maron iris...

Krikov de malproksime kapjesis; Taisja, malgaje ridetante, rigardis al la filo. Silvestro Petroviĉ, dankinte pro la afabla traktado, leviĝis, demandis, kie li loĝos. Taisja kondukis lin en alian duonon, kie ĉio estis kovrita per tapiŝoj kaj tapiŝetoj, kie same verdis en potoj herboj kaj malgrandaj arbetoj. Jegorĉjo jam estis disponanta la aĵojn de Ievlev, dismetanta sur la tablo librojn, desegnajn instrumentojn, pendigis sur la muro kompason, barometron, pistolojn, kurban kaj rektan sabrojn. En kandelingo kraketadis kandeloj, en la forno varmege brulis brulŝtipoj. Kato, gravaspekte fleksiĝante, kiel dormema mastro trairis la ĝisblanke skrapitan plankon.

— Ĉu plaĉos al vi ĉi tie, Silvestro Petroviĉ? — demandis Taisja. — Ĉu bone estos? Hodiaŭ ja vere estas kviete, sed povas okazi, ke ĉe ni estos orfoj, du aŭ tri. Okazas, ke ili bruas...

— Kiaj orfoj? — miris Ievlev.

— Avino nia, okazas, prenas ilin...

— Por kio?

— Nu, kiu scias... — ridetis Taisja. — Tuj ne eblas diri, por

kio. Ŝi prenas orfojn — kaj ĉio...

— Dia afero, — klarigis Jegorĉjo. — Nia avinjo delonge tia estas...

Ievlev komprenis, diris, ke la orfoj lin ne ĝenos. Taisja ridetis karese kaj foriris.

— Nu, sinjoro kapitan-komodoro? — demandis Jegorĉjo.

— Ja saĝulo vi estas, saĝulo, kion mi sen vi farus, mi eĉ ne povas imagi...

— Ja pereus vi, Silvestro Petroviĉ, — rikaninte, sciigis Jegorĉjo. — Veron mi diras, je Dio. Kaj en Holando vi pereus, kaj en Londono, kaj ĉie, kie ni estis. Pro malsato vi mortus...

4. Konsiliĝo

La unua venis pafista regimentestro kolonelo Ruĵanskij.

Ievlev petis lin eksidi, afable alŝovis al li skatolon kun forta tabako, erikajn pipojn, kandelon por bruligi. La kolonelo, eligante aroman fumon, nehaste komencis rakonti, kiela estas vivo en Arĥangelsko. Silvestro Petroviĉ, en hejma, subŝtofita per malkara pelto kaftaneto, en peltaj duonbotoj, kun pipo en la mano, iradis en la ĉambro, iam sidiĝadis kaŭre antaŭ la forno, disbatadis brulaĵojn per fajrostango, rigardadis al flagranta per flava lumo malhelruĝa braĝo. Trans la muro Taisja estis mallaŭte kantanta al Ivaĉjo:

Dormu, infano,
Dormu, mia kara,
Dormu, etulo,
Dormu, mia suno...

— Gardadon kontraŭ la malamiko ne eblas rimarki sur la tuta vojo, kiun mi veturis! — diris Ievlev sen malaprobo en la voĉo. — Necesus, Simono Borisoviĉ, pri ĉi afero okupiĝi kun tuta atento. La svedoj estas pretaj, kial ni sur forno sidu?

La kolonelo ekstaris, batis sin al la brusto:

— Sinjoro kapitan-komodoro! Se mi iujn vortojn al la vojevodo diras — li mokas min! Diras, ĉu vi, maljuna stultulo, ĉu vi, hundo fava, kontraŭ la svedo la manon levis! Sidu silente, kviete! Eble, la Siro pace al sia frato reĝo Karolo niajn lokojn, de Dio forgesitajn, fordonos. Estu Rusujo en oriento, kaj ĉi tie ni ne havas aferojn! Sinjoro kapitan-komodoro, ne por denunco mi diras al vi: dufoje mi petis la vojevodon pro ĉiuj miaj servoj kaj pro la aĝo kaj grandaj malsanoj — lasi min demisii. Li ne lasas, insultas, sidu, diras, kviete! Sed kiel do mi povas kviete sidi...

Ievlev interrompis:

— Ne, Simono Borisoviĉ, nun ne estas konvena tempo por honestan militiston de la afero forliberigi. Tiel ne estos. Ekde la morgaŭa mateno — montru la pafistajn regimentojn, kiel ili estas, ne por trompo — por la afero. Se ili estas ĉifonaj, en truoj, ili iru tiaj. Ni rigardos. Jam morgaŭ mi ordonos komenci gardan servadon...

Li aliris la tablon, glatigis per la polmo planon de la urbo Arĥangelsko kun ĉiuj buŝoj de Dvino, kun apudaj vilaĝoj, kun monaĥejoj kaj tombejoj. La pafista regimentestro ekstaris apud Ievlev, presbiope mallarĝigis la okulojn al la plano. Duope ili komencis verve pridiskuti, kie devas esti gardoj kontraŭ la svedaj militistoj. La regimentestro rezonis ĝuste, en la pasinteco de la maljunulo estis granda soldata sperto. Ievlev,

kun krajono en la mano, notadis, kiom en la vojevodujo estas da trupoj de ĉiu speco, kiuj homoj estas pli spertaj en la pafistaj regimentoj — la Rusa kaj la Hajduka. Li enskribis la kvanton de dragonoj, rajdistoj, enskribis, kiom da homoj eblas armi, se aperos milita neceso. La kolonelo ardiĝis, frapadis per la pipo al la tablo, laŭdadis soldatojn, kaporalon Krikov-on.

— Atendu, Simono Borisoviĉ, — diris la kapitan-komodoro, — kiu Krikov? Ĉu la malpromociita? Atanazio Petroviĉ?

La kolonelo kuntiris la brovojn, mordante la grizajn lipharojn:

— Li. Trafis la viro en embarason. Fremduloj, hundaj idoj, tion intence faris. Sed li estas bona soldato, bona...

— Ĉu vere bona?

— Mi mian kapon vetas! — kriis Simono Borisoviĉ. — Maljunan, kalvan, sed honestan kapon. Mi vetas kontraŭ ĉiuj ruzaj fremdlandanoj, kiuj pereigis la homon. Vi mem pensu, Silvestro Petroviĉ: tiuj, kiuj embarasis lin, al Karolo transfuĝis, sed li plu restas kaporalo. Aŭskultu min, maljunulon. La doganaj oficistoj, kiuj laŭ elekto de la negocista cento la doganejon regas, amas lin tutkore, Krikov-on. Ja per liaj laboroj, kaj lia honesteco, kaj lia nekorupteble co ĝis nun nia doganejo tenas sin. Estranta oficiro mankas, kaj al li ĉiuj kutimiĝis, kaj vokas pro ĉiu okazaĵo — Atanazio Petroviĉ tien, Atanazio Petroviĉ ĉi tien!..

La maljunulo flamiĝis, brunaj makuloj aperis sur liaj vangoj.

— Vi kredu min, kredu! Vi lin voku kaj konversaciu, kaj en liajn okulojn rigardu — kia estas viro. Kaj ĉu indas paroli? Donu al mi centon da tiaj bravuloj — kaj mi ne timas la

svedon, mi disbatos lin, malamikon, al etaj pecoj, por ĉiam li forgesos vojon al ni. Mi eĉ pli multe diros: la solan Krikov-on Atanazion Petroviĉ-on mi interŝanĝas al tuta rajdista regimento de dungitoj...

Ievlev silentis, kun ĝojo rigardante al la ekscitiĝinta kolonelo.

— Nu, nu, sufiĉas! — diris finfine Silvestro Petroviĉ. — Sufiĉas, mi kredas, mi scias. Ni provos, skribos al Moskvo, eble, io rezultos...

— Pri kio do?

— Pri Krikov, sinjoro. Necesas la malhonoron de li forigi. Antaŭ nelonge vidis mi, kia li iĝis dum la pasintaj jaroj: ronĝas la homon angoro, videble.

— Ja kiel ne ronĝi, provu, spertu tion...

Ievlev detale eldemandis, kiel foriris el Arĥangelsko Snivin kaj James. Pri Snivin estis sciate malmulte, oni sciis nur, ke sian familion li anticipe sendis mare en forajn landojn, post kio foriris al Moskvo. Poste liaj spuroj perdiĝis. Majoro James, ofendita de Apraksin, longe skribadis leterojn al Kukujo kaj per Lefort kaj aliaj fremdlandanoj elpetis al si rajton servi al la caro per spado ne en Arĥangelsko, sed sur batalkampo. Estinte pardonita kaj favorita, li ĝisatendis la neĝoŝtormon ĉe Narvo kaj enmanigis sian spadon al reĝo Karolo.

— Ĉu li al tiu servas? — demandis Ievlev.

— Al kiu estas pli profite — al tiu li servas.

— Ĉu ankaŭ vi tie estis, Simono Borisoviĉ?

— Ĝuste pro tio mi la kolon ne povas turni! — subridante,

respondis Ruĵanskij. — Unu mia soldato, — forgesis mi lian nomon, bona viro estis, — en tiu horo, kiam la fremdlandaj oficiroj fuĝi komencis, la sango en li ekbolis — li ilin per klabego komencis vipi. Sed en la blizardo, en mallumo — ne distingis. Anstataŭ fremdulo li min kun tuta sia ursa fortego krucosignis...

En la malvarma vestiblo ŝrikis la ŝvelinta pro frosto pordo — Jegorĉjo venigis ŝipajn majstrojn, ŝipajn rudristojn: Jakobon kaj Moseon, grandegan Semisadov-on, ankoraŭ kvar pomorojn pli junajn, kiujn Ievlev ne konis. En la ĉambro aperis forta odoro de jakoj el tanita ŝafofelo, de fokoleo, de gudro, laŭte tondris base Semisadov:

— Ja maljuniĝis vi, Silvestro Petroviĉ, post Azovo. Jen — eĉ grizo estas en la haroj...

Ili interkisiĝis trifoje, kaj kiel eblis ne interkisiĝi, kiam ili pasis kune tiom da vojoj? Forgesinte pri aliaj homoj, ridante, ili rememoradis iun ŝipon, kiun ili veturigis el Moskvo al Voroneĵo; kiel Semisadov subite tiam, elturmentiĝinte, post arbusto ekdormis, kaj perdiĝis, — oni pensis, ke lin lupoj buĉis; kiel ili iris kun Donaj kozakoj sur ties boatoj kontraŭ turkoj, kaj kiel ili kaptis ŝipon...

— Kaj Floro Minjajev, la kozaka hetmano! — subite ekridegis Semisadov. — Ĉu vi memoras, Silvestro Petroviĉ? Vi al li diras: lasu la pipon, ĉi tie estas pulvo, sed li...

Pro rido larmoj aperis sur la okuloj de Semisadov, Ievlev, ridetante, rigardis al li, balancadis la kapon:

— Krevos vi, ferdekestro, je Dio krevos.

Finridinte, viŝinte la okulojn per tuko, Semisadov diris:

— Vi tiam foriris sur gigo, ne ĝisatendinte, kaj ni ne plu intervidiĝis. Kiom da provizo prenis ni de la turko: nur da grenadoj, mi kalkulis, estis pli ol kvin mil...

— Sen la kruro do kiel vi vivas? Ĉu malfacile? — demandis Ievlev.

— Ne gravas, mi kutimiĝis. En la maro iam estas malfacile, sed sur la bordo ni iel-tiel vivas.

Silvestro Petroviĉ ĉirkaŭrigardis la ĉambron, ridetantajn harditajn de vento vizaĝojn de pomoroj, salutis ĉiun, mallaŭte demandis Jegorĉjon:

— Kaj tiuj ĉi kiuj estas — la kvar, kiuj sidas ĉe la forno?

— Kozakoj, Silvestro Petroviĉ, — diris Jegorĉjo. — La ŝipaj majstroj ilin ĉi tien alveturigis, en la lokajn ŝipkonstruejojn. Ili mem ĉion rakontos...

Ievlev metis du kandelingojn pli oportune, salutis malfruintajn Nilon Longinov-on kaj Kopilov-on, eksidis sur la benkon. La rudristoj, ŝipmajstroj, maristoj de la Azova militiro, revenintaj al sia Arĥangelsko, ĉesis interflustri, eksilentis, komprenante, ke ili ne vane estis vokitaj al la veninta laŭ cara ukazo granda oficiro.

La kapitan-komodoro silentis iom, koncentrante sin, prepariĝante al tio, kion li strikte decidis fari, al tio, kion la caro nomadis konsiliĝo, konsilio, kunsido. Estos ankaŭ ĉi tie kunsido, konsiliĝo, konsilio!

Tre mallaŭte iĝis en la ĉambro. Kaj denove ĉiuj ekaŭdis, kiel trans la muro kantas Taisja:

Altas-altas ĉielo blua,

Larĝas-larĝas l' ocean'-maro,
Muskaj marĉoj — eĉ fin' ne videblas
De nia Dvino, de l' Arĥangelska...

— Sinjoroj honestaj, de la mara afero prizorgantoj! — nelaŭte diris Ievlev, kaj facila susuro trakuris la ĉambron: ankoraŭ neniu tiel nomadis la pomorojn. — Sinjoroj! Ĉio, kion hodiaŭ vi ĉi tie bonvolos aŭdi, estas sekreta cirkonstanco, pro solvo de kiu okazi povas eksterordinaraj por ni sekvoj. Havas ni ateston pri tio, ke la reĝo sveda Karolo intencas ataki per sia floto la urbon Arĥanĝelan, por ke por ĉiam meti finon al la komenciĝinta ĉi tie ŝipkonstruado. Li, reĝo Karolo, dezirus vidi ĉiujn rusajn ŝipajn majstrojn pendumitaj, kaj ŝipkonstruejojn niajn, per tia sanga laboro konstruitajn, — forbruligitaj. Tiujn ŝipojn, kiuj kun granda diligento kaj suferoj, kiujn vi pli bone scias, ol mi, estis konstruitaj, ĉi Karolo dezirus forkonduki en Svedion, levinte sur ili flagojn de sia reĝa potenco. Nia urbo estos donita por disrabo kaj malhonorado al dungitaj matrosoj de la sveda krono... Por gardo kontraŭ tiu granda malfeliĉo lia cara moŝto Siro Petro Aleksejeviĉ ordonis al ni konstrui sur Dvino fortreson.

Ivano Kononoviĉ elprenis el la poŝo grandan buntan tukon, kun faciliĝo viŝis la kolon kaj la vizaĝon. Majstro Koĉnev estis rigardanta al Ievlev per ardaj okuloj. Semisadov, forturniĝinte, estis eliganta fumon el sia mallonga argila pipeto.

— La fortreson ni konstruos! — diris Ievlev. — Ne nur pri ĝi temas. Vi estas homoj lokaj, maraj, ekde la praavoj iradas en marojn. Ĉio ĉi tie estas por vi konata, ĉio ĉi tie estas por vi propra. Donu konsilon — kiel ankoraŭ gardi nin kontraŭ la granda malfeliĉo? Kion necesas fari?

Semisadov subite turniĝis sur la benko, demandis abrupte:

— Ĉu veron diri, Silvestro Petroviĉ?

— Veron, — ne tuj respondis Ievlev. — Veron, ferdekestro.

— Eksterlandajn komercistojn ĉiujn ĝis la lasta — aresti! — deklaris la ferdekestro de la Azova floto. — Tio estas la plej grava afero...

Ievlev frapis la tabloplaton per la polmo, interrompis Semisadov-on:

— Pri la fremdlandanoj ne temas! Ne diru stultaĵojn!

— Vi konsilon petas, Silvestro Petroviĉ, — per kolera voĉo diris Semisadov, — jen mi konsilon al vi diras. Kaj se iuj havas mallongan memoron, tiam bonvolu — mi rememorigos, kiel dum la sieĝo holanda oficiro, artileriisto, cara baptofilo Jansen, tiu, kiu ne la unuan fojon kaj la servon, kaj la kredon ŝanĝis, — al la turkoj transiris pro ilia oro, kaj, nitinte la kanonojn, en Azovon foriris, en la fortreson. Vi vane al mi la manon svingas, Silvestro Petroviĉ, tiun malican malfeliĉon mi neniam forgesos, kiel pro tiu perfidulo kvar cent homoj en manbatalo pereis, mi mem tie estis, — tiun sangegon mi ĝis la morto ne forgesos...

— Sed ja radumita estis Jansen! — kriis Ievlev.

— Malfrue radumita! Per malbona morto finis sian vivon Jansen, sed la malfeliĉon, kiun li faris, per tio oni ne riparis...

— Kion do vi deziras?

— Ne kredi al ili! — kun malespero diris Semisadov. — Eble, eĉ tre bonegaj homoj inter ili estas, sed ial tro multe ili por ni kostas. Ĝis kiam ni ekscios, kiu bonas, kaj kiu malbonas,

ni tutan sangon perdos, sinjoro kapitan-komodoro...

Silvestro Petroviĉ kunpremis la dentojn, lia vizaĝo brulis, al Semisadov li ne rigardis.

— Amikojn mi havis tie, — pli mallaŭte, kun funebro diris Semisadov. — El Arĥangelsko, el Ĉarondo, el Mezeno. Eble, ili ankaŭ nun taŭgus, de batalo ili ne fuĝis, al kugloj ne riverencis...

Kaj li ree forturniĝis.

Ĉiuj silentis.

— La vojevodo ankoraŭ... — kun subrido, singarde komencis majstro Koĉnev.

— Kio — la vojevodo? — streĉiĝis Ievlev.

Koĉnev rigardis ĉirkaŭe, liaj saĝaj okuloj rigardis kuraĝe.

— Parolu, sinjoro majstro! — divenante, kion povas rakonti Koĉnev, subtenis Ievlev. — Parolu, ni aŭskultas vin...

— Sinjoro kapitan-komodoro! — laŭte kaj klare komencis Koĉnev. — Vi min konas dum multaj jaroj, jam de Onego ni kune en Moskvon veturis, tiam vintre ni kune en Perejaslavo-Zalesskij ŝipojn faradis, kune de la caraj amuziĝoj komencis...

Li subite stumblis, kvazaŭ enpensiĝinte, kaj kiam li ekparolis ree — pli mallaŭta, pli obtuza iĝis lia voĉo: rememoriĝis Jakimo Voronin, laŭtaj ruladoj de liaj komandoj en barkoj ĉe Azovo, lia morto en la batalkampo.

— Forte ni tiam malpacis kun la forpasinto, sinjoro Voronin, kverelis senkompate, — li ripozu trankvile, bona estis viro, povus iĝi vera maristo, ne ĝisvivis, bedaŭrinde. Ne timis li la aferon, kvankam estis el bojaroj...

— Mallaŭte esprimu, bojaroj proksime! — kun subrido el angulo avertis Ivano Kononoviĉ.

— Vere, proksime, sed mi diros alude! — konsentis Koĉnev. — Multon mi kun vi kune spertis, sinjoro kapitan-komodoro, kaj en Moskvo por la Azova militiro ŝipojn konstruadis, kaj en Voroneĵo, kaj en Kozlovo, kaj en Sokolsko. Multe vi kredis al mi, ne havas mi ofendon kontraŭ vi. Kune ni malsatis, kune frostiĝadis, kune brasiksupon manĝadis, kie unu brasiko al alia krias «kie vi estas?»...

En la ĉambro oni ekridis, ridetis ankaŭ Silvestro Petroviĉ.

— Ĉio estis! — kun suspiro diris Koĉnev. — Estis ankaŭ tio, ke vi al mi kvin mil rublojn da ora trezoro konfidis, por ke mi veturigu por nutrado de laborantoj. Veturu, vi diris, sinjoro majstro Koĉnev, ĉar al kancelarianoj mi fidon ne havas. Ili ŝtelos, kaj poste malicajn rabistojn kulpigos. Sed la laborantoj per malbona malsata morto ĉiuj mortos. Ĉu estis tiel, sinjoro kapitan-komodoro?

— Estis! — respondis Ievlev. — Mi ĉiam al vi fidis, sinjoro majstro Koĉnev, kaj al via saĝo, kaj al la talento, de Dio donita, kaj al honesto via... Mi ĉiam fidis kaj fidos...

— Kaj se tiel, — daŭrigis Koĉnev, — se vi ĉiam fidos, tiam ankaŭ al tio fidu, kion mi nun eldiros. Sinjoro kapitan-komodoro! La vojevodo loka bojaro-princo Prozorovskij tro sate per ni nutriĝas. Ni estas homoj ne stultaj, scias, ke ĉiu vojevodo por nutriĝo venas, kaj li mem manĝi bezonas, kaj liaj amikoj sen pirogo ne vivos. Tamen vi nutriĝu, sed sciu limojn...

Ievlev mallevis la kapon, aŭskultis, kuntirinte la brovojn.

— Ĉi vojevodo, sinjoro kapitan-komodoro, laŭ la moro havas ŝlosilojn urbajn kaj pordegajn, li por ni estas kaj juĝisto, kaj defendanto, kaj unua inter ni batalanto. Sed se okazos malica malfeliĉo, nigra jaro — ĝuste li nin perfidos...

Silvestro Petroviĉ ĵetis rigardon al Koĉnev kaj ree mallevis la kapon: la sango laŭte batadis en la tempioj, la voĉo de Koĉnev kaj ĉiuj ili, dissidiĝintaj ĉi tie viroj, subite iĝis malamataj.

— Turmentas li nin kiel deziras, — daŭrigis Koĉnev, — lastan ĉemizon de la metiisto forprenas. Antaŭ nelonge apude murdo okazis, li, vojevodo, kunpelis en malliberejon preskaŭ kvindek homojn, ne liberigas, ĝis ili elaĉetos sin, alie promesas bati per bastonoj senkompate. Sen subaĉeto al li pro afero eĉ ne iru. Impostojn li ŝiras de la popolo al si mem, hodiaŭ la glacitruan monon li levis ĝis dek kopekoj por buŝo. La akvo en Dvino ja estas Dia? Kiel do rezultas? Se iu deziras akvon el glacitruo preni — pagu, kaj al kiu — al la vojevodo...

— Vi pro kio pri tio parolas? — levante pezan rigardon, demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ja pro tio, — laŭte kaj kun kolero en la voĉo diris Koĉnev, — pro tio, sinjoro kapitan-komodoro, ke vojevodo bojaro Prozorovskij multajn malfeliĉojn al ni faros, kaj por ke tio ne okazu, necesas sur la unua aĉa tremolo, per same aĉa ŝnuro pendumi la ŝteliston kaj ofendanton, koruptulon kaj latronon, juĝiston maljustan, rabiston lumtagan bojaron vojevodon Aleksion Petroviĉ-on...

Silvestro Petroviĉ ne eltenis, ekstaris de la tablo, kun bruo faliginte kandelingon, kriis:

— Silentu! Vi freneziĝis ĉiuj! Ĉu estas via afero la vojevodon juĝi?

Brulanta sebo ekfluis sur paperoj sur la tablo. Jegorĉjo kun timigita vizaĝo kovris ilin per la kaftano, metis la kandelingon sur ties lokon.

— La vojevodo estas per la cara ukazo sendita, lin la caro juĝu, sed ne vi! Pendumi! Tro multon vi ekdeziris! Ĉu por juĝo pri la vojevodo mi vin al mi vokis?

La gastoj silentis, interrigardante, Koĉnev plu rigardis sentime.

Ievlev eksidis, forte kunpremis la polmojn, por trankviliĝi, la koro estis malbone, malglate batanta en la brusto. Kun angoro li pensis: «Jen kiel mi kriis! Kvazaŭ histeriulino sur preĝeja perono. Malbone, malbone!»

Superinte sin, li diris ĝentile:

— La aferon mi petas diri. Kiel de la malamiko saviĝi, kiajn por tio senprokrastajn rimedojn uzi, atendas mi konsilojn viajn, sinjoroj, kun espero...

Sed la esperoj ne praviĝis.

La homoj silentis longe, poste ekparolis singarde, interrigardante — kion eblas diri, kaj kion ne eblas. Rudristo Moseo konsilis obstrukci, superŝuti la Pudoĵman kaj Murmanan buŝojn de Dvino. Ĥagajo Pustovojtov per malamikema voĉo diris, ke eblas ĉiujn buojn de la ŝanelo forigi — por ajna gardo kontraŭ malamikoj. La pafista kolonelo eldiris supozon — meti sur la Marka insulo kanonan baterion. La Donaj majstroj-kozakoj aldonis, ke eblas ne nur superŝuti la buŝon, sed ankaŭ per fostoj bari, kiel ĉe ili sur Dono estis

farata, por ke la superŝutaĵon ne forportu fluanta akvo. Nilo Longinov kun Kopilov kaj la ceteraj homoj silentis.

— Ĉu vi nenion plian diros? — demandis Silvestro Petroviĉ.

La blankmaranoj interflustradis, iliaj vizaĝoj estis strečitaj. Silvestro Petroviĉ dankis la gastojn, forakompanis en la vestiblon. En la vestiblo Semisadov suspiris:

— Aĥ, Silvestro Petroviĉ, Silvestro Petroviĉ, bona vi estas homo, sed tamen rigardas mi al vi kaj pensas: dirus mi vorton, sed lupo ne forportu! Nu, ne koleru!

Samtie ŝipa majstro Ivano Kononoviĉ mallaŭte petis:

— Pardonu, sinjoro kapitan-komodoro, Timoĉjon mian, Koĉnev-on. Juneco estas sensperta...

— Do pri kio vi diras, Ivano Kononoviĉ?

— Spite li diris pri nia kara princo-vojevodo, senpripense, junas li ankoraŭ...

— Kiu junas? Ĉu Koĉnev?

— Per la menso junas, Silvestro Petroviĉ, vi pardonu, ne diru tie, kie estas ordonite, vi pardonu nin, ni servos...

Al Ievlev malklariĝis la vidado, sekiĝis la buŝo.

— Sed kiel do vi, Ivano Kononoviĉ, pri mi pensas?

— Nemalmultaj nun homoj, pro simpleco, pro malsaĝo, ion diras, — ne rigardante al Ievlev, rapide, per fremda voĉo estis diranta la majstro, — diras ie ajn, kaj poste respondecas. Hodiaŭ ni estis irantaj ĉi tien, kaj renkonten rajdistoj homon trenas. Kio estas? Vorton, ili diras, li eldiris. Vi faru mizerikordon, pardonu. Kaj kia li estas majstro, unuaranga...

Li estis parolanta, sed en la okuloj staris malamikemo.

En la ĉambro, spiregante, estis trinkanta kvason la pafista kolonelo, subridante diris:

— Jen popolo, kia popolo! Ploros vi kun ĝi, Silvestro Petroviĉ!

Ievlev silente eksidis sur la benkon, malalte mallevis la kapon, fermis la okulojn, kvazaŭ pro la kandela lumo. Paroli li ne deziris.

Nokte li dormis malbone: estis varmege, sufoke, li deziris trinki. Li trinkis, malvarmigis la ĉambron, — plu ne povis dormi. Ĉiam rememoriĝadis Koĉnev en la voroneĵaj ŝipkonstruejoj, makulita de peĉo, kun kunmetebla mezurilo, kun lerta hakilo, kiel li rigardas al ekipita ŝipo, kiel li diras:

— Ja nemalbone ni konstruis, Silvestro Petroviĉ. Bona ŝipeto! Kaj bonira ĝi estos, nepre bonira...

Kaj li, Koĉnev, povis pensi tielaĵon pri la homo, kun kiu li per unu sama dreliko kovriĝadis, kun kiu el unu sama bovlo manĝis?

Kunpreminte la dentojn, li pufigis sub si ledan kusenon, kun kolero demandis sin mem:

— Do kion fari? Se doni al ili liberon, ili ĉiujn pendumos! Hodiaŭ Prozorovskij-on, morgaŭ Apraksin-on, poste ankaŭ min. Kion do fari?

5. Venos tempo — ni sonorigos alarmon!

Nokte al Atanazio Petroviĉ en la doganejon venis Silentulo kun Vataĵnikov kaj kun delonge forestinta ie en ermitejoj Forĝisto. Krikov eliris al ili en froston sub ludantaj en la ĉielo

fajroj de nordlumo; oscedetante, envolvante sin en surĵetitan sur la ŝultrojn peltjakon, demandis:

— Kial vi venis, noktuloj? Ĉu tago ne sufiĉis? He, ankaŭ Forĝisto estas kun vi?

— Ja tial ni venis, — severe diris Silentulo, — ke hodiaŭ en la drinkejo de Magrulo okazis malfeliĉo. Kaptis oni nian Eŭtimion, trenis en la arestejon...

Krikov tuj ĉesis oscedi kaj tiri sin, kondukis la amikojn en la kameron, kie estis tenataj armiloj por la dogansoldatoj. En la vestiblo li demandis Silentulon per rapida flustro:

— La princan servutulon ĉu vi sur Dvino batis?

— Certe, mi...

— Ĉu sola?

— Ne per regimento, certe, forton mi havas sufiĉe.

Knaris la pordo de la kamero.

— Jen kio al ni mankas! — diris Silentulo, rigardante al la muskedoj kaj fusiloj. — Ni sonorigus alarmon, bruligus la diablon-vojevodon, prenus la razmuzelajn fremdulojn sur hakilojn...

— Vi, kara amiko, eĉ sen muskedoj militas, — diris Krikov. — En la tuta urbo bruo ekiris...

Silentulo morne subridis:

— Je unu Judaso malpli, — ĉu tio estas afero. Nur rido...

Liaj okuloj flagris per malicaj fajretoj, tutan lian fortikan korpon skuis tremo.

— Ni drinkus! — petis Vataĵnikov. — Frostiĝis mi kaj li

dum du noktoj...

— Dum du?

— Ja li kun mi tiun Judason gvatis, — klarigis Silentulo. — Dum Andreĉjo forpasinta kun putinoj amuziĝis, dum li plue diboĉi iris.

— Kaj hodiaŭ same, — lace plendis Vataĵnikov. — Per malantaŭaj vojoj el la drinkejo, tra la Trabata strato, kaj al ni la vojevodaj hundoj per muskedoj pafis, kvazaŭ al lupoj.

Atanazio Petroviĉ alportis duonstofon da vodko, peklitajn kukumojn, panon. Vataĵnikov drinkis, rakontis pli detale, kiel ĉio okazis kaj en la hieraŭa nokto kaj en la hodiaŭa. Tiu Andreĉjo kaj en Azovo denuncon faris kaj ĉi tie intencis pri iuj. Pro la kristana pafista sango li estis murdita. Kaj hodiaŭ, en la drinkejo, konversacio estis paca, oni parolis pri tio, pri kio nun oni ĉie parolas: ke venas svedaj militistoj ataki Arĥangelskon. Eŭtimio Gridnev al tio respondis, ke eĉ ne tiajn ni rebatadis, tamen nun ni apenaŭ rebatos, kien ajn vi paŝu — ĉion fremdlandanoj scias. Okazis disputo pri fremdlandanoj — por kio al ili tia libero estas donita, ke estas por ili nenia brido. Unu diris: la caro mem estas fremdulo, kaŝe anstataŭigita trans la maro. Kaj la nia, la vera estas en mallibero. Alia diris: fremdulo razmuzela kaj nikonano trifingra[87] — estas la samo. Tiu disputo finiĝis pace. Tiam Eŭtimio Gridnev insultis la vojevodon per blasfemaj vortoj, ke li la fiskon priŝtelas kaj bridon ne havas, ĉar lin la fremduloj en Kukujo laŭdas...

— Tro longe vi rakontas! — interrompis Krikov. — Kaj mi

87 Nikonano trifingra — t. e. adepto de la reformo de patriarĥo Nikono, preskribanta interalie krucosigni per tri fingroj, sed ne per du, kiel faras la malnovritanoj. *(trad.)*

ne komprenas bone, kiuj homoj tie estis?

— Ja laboraj homoj: iu el la Solombala ŝipkonstruejo, iu el Vavĉugo — por najloj, vidu, ŝipaj alveturis; ankoraŭ ŝarĝistoj, lardofandistoj monaĥejaj... — klarigis Silentulo.

— Nu, insultis Eŭtimio, poste kio estis?..

— Kaj poste estis tio, ke Eŭtimio nia Gridnev ankoraŭ vorton diris kontraŭ la vojevodo, ke kvazaŭ ne rebatos ni la svedon, se la princon ne faligos, kaj ke kvazaŭ ankoraŭ vendis li nin ĉiujn en la nekristanan svedan kredon, kie anstataŭ Dio Martino Luta regas, kaj ke la homoj vojevodaj Gusev kaj Molokojedov, kaj dumaano Larionov, kaj lia kuracisto-fremdulo pro tio monon ricevis nemalgrandan — sakon da ormoneroj. Kaj ke kvazaŭ al Martino Luta nun sur Dvino, sur la Resurekta kajo oni foston starigos — por preĝado...

Silentulo verŝis al si glaseton, malrapide elsuĉis ĝin tra la dentoj:

— La popolo aŭskultas. Tiam iu subite diras: «vorto kaj afero»[88]. Ŝajne intendanto de la konstruejo de Baĵenin. Batalo okazis, ne superis ni ilian forton, foriri devis...

— Tro timemaj! — diris Krikov.

— Por vi estas sentime paroli ĉi tie sidante, vi mem tie batalus! — ofendiĝis Silentulo. — Rajdistoj nin atakis ĉirkaŭ dek du, per sabroj komencis bati.

Krikov silentis.

88 «Vorto kaj afero» — publika elkrio de la frazo «Vorto kaj afero cara!» signifis signalon por tuja aresto de la denuncata homo (laŭvorte la frazo signifis: «vorto» — mesaĝo, denunco pri krimo; «afero cara» — la fakto mem de krimo kontraŭ la caro — komploto, ŝtatperfido, blasfemo kontraŭ la caro k. t. p.). *(trad.)*

— Torturos oni lin! — diris Vataĵnikov. — Sur pendigilo. Per fajro bruligos...

— Ja torturos! — respondis Silentulo. — Sed pro kio?

Forĝisto, silentinta ĝis nun, subite furioze kriegis:

— Pro kio? Nikotianon damnitan, la satanan venenon, la diablan logon — ĉu vi fumas? Teon oni nun komencis trinki, — kio ĝi estas? Trinkaĵo anatema, jen kio ĝi estas! Pu, pu, abomenaj, damnitaj, la caron oni en Stokholmo anstataŭigis, al ni nekristanon alveturigis, li barbojn tondas, finas la kredon veran, maliculo...

Krikov metis la manon sur la ŝultron de Forĝisto, diris kun forto:

— Kvietiĝu, histeriulo!

Forĝisto forŝiriĝis, dentomontris al Atanazio Petroviĉ, liaj malgrandaj okuloj brulis freneze:

— Vi? Kiu vi estas mem? Razmuzela, jen pipo via nikotiana, satano, ne tuŝu min per via manego... Kruelan persekuton mi toleros, sed ne kun vi, tabakuloj, herezuloj, idoj antikristaj...

Silentulo prenis Forĝiston je la kolumo de la malnova truiĝinta kaftano, skuis, ordonis eksilenti. Vataĵnikov diris:

— Jen, faru kun li aferon. Antaŭ nelonge oni diris: en ermitejoj oni ĉie fastas ĝis tio, ke eĉ sur la piedoj stari ne povas, iniciĝas pri antikvaj donacoj kaj, adiaŭinte la mondon, atendas en tremo la arĥanĝelan trumpeton. Iuj nun ĝis morto fastis, pro malsato mortis...

Forĝisto ree forŝiriĝis el la manoj de Silentulo, ekflustris,

globigante la okulojn:

— Estos fino de la mondo en noktomezo inter sabato kaj dimanĉo, antaŭ la Butersemajno: la tero tremos, disfalos al sablo ŝtonoj, estingiĝos la suno kaj la luno, pluve steloj ŝutiĝos sur la teron, fluos riveroj fajraj kaj voros ĉion vivantan sur la tero. En fajro aperos Antikristo: karno lia fetoras, faŭko lia eligas fajron, el la nazo, el la oreloj same fajroj brulas...

— Ĉu per akvo lin malvarma ŝpruci? — kun tristo en la voĉo diris Krikov. — Ek, Vataĵnikov, portu sitelon...

Vataĵnikov ekridis, svingis la manon:

— Turmentanto, vera turmentanto! Iradas en domoj, diradas vortojn konfuzigajn; iuj homoj eĉ la buŝojn malfermis: Nilo Longinov kun Kopilov lignoblokojn por si elĉizis, ĉerkojn, morti prepariĝis. La edzinoj ploregas. En la konstruejon de Baĵenin li sian infekton portis, predikanto: iuj viroj estis laboremaj — de la laboro foriris, morti prepariĝas. Freneziĝis li, je Dio...

Atanazio Petroviĉ prenis la pipon, malfermis la tabaksaketon; Forĝisto strabis lin, mallaŭte diris:

— Foriros mi. Ne havas mi kion fari kun vi.

Krikov respondis trankvile:

— Iru, iru! Vere, vi ne havas! Nur histerias vi...

Forĝisto foriris, ne riverencinte, seka, magriĝinta, kun furioza rigardo. Silentulo kun envio diris:

— Fortego, diable! Ne manĝas, ne trinkas, ne dormas — kiel li ne mortis ĝis nun. Kaj mirinda majstro: ĉion li povas fari — lancon, fusilon, kanonon gisi, sonorilon por preĝejo. Nek

froston li timas, nek tempeston en maro, — nenio lin embarasas. Kaj kiam paroli komencas, la popolo nur lin aŭskultas — ne gravas, ke li diras galimation...

Ili silentis iom. Atanazio Petroviĉ snufadis per la pipeto, pensadis: «Jes, fortego! Tian per nenio eblas rompi, ĝis li mem rompiĝos. Kaj kiam rompiĝos, tiajn komencos figurojn fari, eblos aĥi!»

— Atanazio Petroviĉ! — vokis Silentulo.

Krikov skuis la kapon, ekrigardis al la gastoj.

— Donu al ni pistolojn, donu muskedojn, pulvon donu, kuglojn, — postuleme diris Silentulo. — Jen kiom da ili estas ĉe vi — plena tenejo. Donu — vi ne bedaŭros...

— Frue!

— Ĝustatempe, ne frue. Antaŭ nelonge estis ĉi tie preterpase fuĝinta pafisto de la Protopopova regimento Ankudinov Marcelo. De Azovo li iras al ermitejoj — kaŝiĝi. De li ni eksciis pri la servutulo-denuncisto Andreĉjo, kiu Judaso en torturon tiom multe da homoj ĵetis. En Azovo estus bone, se ili komencus ĝustatempe...

Krikov silentis, atente aŭskultis.

— Estis tie bona gvidanto super ili — pafisto, multjara maljunulo, same en la Protopopova regimento servis. Antaŭe li estis kampulo ĉe bojaro Ŝein, kaj tiam li kun Stefano Razin iradis. Pribruliginte stangon, — kun tiu stango li, kiel kun lanco, sian sanktan aferon faradis — bojarojn batadis morte. Do tiu maljunulo glora Parteno Timotejev promesis al Moskvo iri, rememorinte la junecon, vojevodojn sur la vojo ĉiujn ekzekuti, panon al la popolo doni, kaj en Moskvo fremdulojn

damnitajn kaj bojarojn fini pro tiuj regimentoj, kiuj estis senkulpe batitaj...

— Nu?

— Al la unua de septembro en tiu jaro estis difinite, sed ne sukcesis ili. Oni arestis kaj komencis torturi. Sed ni ĉi tie povus, Atanazio Petroviĉ...

— Frue! — firme diris Krikov. — Frue, amiko bona. Kiel en Azovo estos, aŭ eĉ pli malbone.

— Ĉu vi ne kredas, ke la popolo leviĝos? — brilante per la okuloj, demandis Silentulo. — El la Solombala ŝipkonstruejo laborantoj multaj iros, el Vavĉugo leviĝos, al la baĵeninaj homoj nur diru, kiu kulpas pri la malfeliĉo — per la dentoj ŝiros. Bruligos ni niajn maliculojn, la kapojn sur palisojn, elektos por si bonan homon, vivos juste...

La vizaĝo de Silentulo subite iĝis infana, reva, la okuloj bonkoriĝis, li tuta kvazaŭ senglaciiĝis. Ili parolis longe, ĝis la triaj kokokrioj. Atanazio Petroviĉ, kuntirante la brovojn, diris, ke da homoj leviĝos ne tiom multe, ke se leviĝi antaŭ la tempo — oni batos kaj la afero finiĝos per nenio, ke jen alveturis Ievlev Silvestro Petroviĉ — homo de severa karaktero, ĉe la vojevodo ne povis loĝi, eble li starigos bonan ordon en la urbo.

Silentulo kun moko ridetis en la nigran krispan kun grizo barbon.

— Jen, ne povis vivi lupo kun urso. Ĉiuj ili estas la sama satano. Hieraŭ kunvenigis la alveturinta sinjoro kapitan-komodoro iujn el la lokaj homoj. Koĉnev, la ŝipa majstro, la vojevodon tuŝis, tiam Ievlev via tiel al li bruis, eĉ kandeloj falis, preskaŭ la domon bruligis. Kaj Semisadov, kiu

ferdekestran rangon ĉe Azovo ricevis kaj senkrura revenis, pri fremduloj balbutis, ke ilin — en arestejon. Sed kio! Eŭtimion en arestejon — certe, eblas...

Tiel disiris Krikov kaj Silentulo kun Vataĵnikov, sen ajna rezulto de la konversacio. Atanazio Petroviĉ kuŝiĝis antaŭ mateniĝo, sed dormo ne venis. En silento ĉiam ŝajnis krakado de multaj svedaj militistaj tamburoj, flamanta incendio super Muskoj, kie staras la domo de Rjabov, Taisja mem kun eta Ivaĉjo sur la manoj, kaj al ŝi iras malicaj militistaj ofendantoj.

Tage Silentulo ree venis, trovis Krikov-on sola, demandis kolere:

— Ĉu vi eliri el la afero deziras? Respondu honeste.

Krikov demetis libron — la infanterian statuton, diris simple:

— Ne diru stultaĵojn, Silentulo! Muskedojn mi donos, pistolojn same donos, pulvo estas. Komandadon, kiam vi alarmon sonorigos, mi mem surprenos. Ĉiuj vi, diabloj, pli multe krii emas, militan arton ne scias tute, kaj se ne scias, tiam batos vin la pafista regimentestro tuj. Ĉu mi prave diras?

Silentulo sendezire kapjesis, konsentante.

— Homojn necesas levi ne dise, sed samtempe multope, batalon necesas fari urĝe, alie oni ĉifos nin. Kun pafistoj, kun dragonoj iri kune. Sed ĉu estas inter ili niaj homoj? Ĉu vi silentas? Jene, frato! Ne tiel ĝi facile rezultas! Por kio do la rusan sangon verŝi — al bojaro kaj fremdulo-ŝtelisto por ĝojo? Ne permesos mi!

Krikov paŭzis, ekparolis nehaste, kvazaŭ pensante:

— Malmultaj ni ankoraŭ estas, amiko, malmultaj. Tiel malmultaj, ke apenaŭ ni superos ofendantojn niajn. Kaj ankaŭ la svedaj militistoj al la urbo, oni diras, intencas iri. Rebati la malamikon necesas, tio estas afero granda, sanga, peniga. Rezonu per la kapo, ne obstinu, — kion fari?

Silentulo ne respondis, kuntiris la brovojn.

— Pensu mem: ni leviĝos, kaj tiutempe la svedo subite venos — kiel tiam ni faru? Diru, se vi scias, instruu!.. Jen, vi ne havas kion diri! Ni vivas en maljusto, monpostuloj nin sekigis, la fremduloj kaj la vojevodo koruptita, kaj la juĝisto maljusta — ĉio ĉi estas vero. Sed la svedo estas patrino kara, ĉu? Ni nun vidas malfeliĉon, sed kion ni vidos, kiam li venos? Li bruligos kaj buĉos ĉiujn, nura cindro restos, kaj ostoj, — jen kio estos. Por li, latrono, nia interna malpaco estas profita, pro tio malfortiĝos ni, al li estos pli facile nin preni. Kaj rezultos ni antaŭ la urbo Arĥangelsko, antaŭ Rusujo, antaŭ Moskvo — perfiduloj. Ĉu tiel aŭ ne tiel?

Silentulo ne respondis, foriris al la amikoj — paroli kun ili. Vespere apud la malnova preĝejeto de Resurekto Krikov kaj Silentulo preskaŭ kunpuŝiĝis — ambaŭ iris rapide.

— Al vi mi iras, Atanazio Petroviĉ, — flustre ekparolis Silentulo. — Ankoraŭ unu malfeliĉo: hodiaŭ en la templo oni kaptis Vataĵnikov-on, kondukis al enketado. Mi kaŝiĝos, se elakviĝi en nekonvena tempo — oni metos la kapon sur palison, ne indulgos. Sed kio estas paliso! Unu bona homo antaŭ nelonge rakontis: novan ekzekuton la caro el trans la maro alveturigis — radon, sur tiu rado oni brakojn kaj krurojn rompas al vivulo, jen kion la fraĉoj elpensis...

Li ridetis momente:

— Jene, Atanazio Petroviĉ, granda kaĉo ĉe ni kuiriĝis. Al la vojevodo Azovo ŝajnis, kvazaŭ kiel en la antaŭaj tempoj lin oni sur lancojn levi intencas. Nu, kaj kiu do tion deziras por si? Por la vojevodo ja la vivo estas bona, kun brasiksupo, kaj la brasiksupo kun viando, al tiu supo pirogoj frititaj, vino superflue, por kio la vojevodo mortu? Tial batalas la batalisto por sia vivo...

Silentulo parolis rapide, sen kolero, kun gaja bonanimeco.

— Nu, kaj la onklon, verŝajne, li rememoras. Ja estas propra sango. Kaj tiun onklon sinjoro Razin sur fortresa muro en urbo Astraĥano per kanaba maŝo strangolis. Steĉjo ja sciis, kiun strangoli, ne eraris, mi pensas. Ŝajnas al bojaro Aleksio Petroviĉ ankaŭ ĉi tie en Arĥangelsko Stefano...

Krikov silentis — aŭskultis, penetrante la rapidajn pensojn de Silentulo.

— Dum mi forestas, — diris Silentulo, — vi, Atanazio Petroviĉ, vivu kvietege. Vin kun ni oni ne vidis, vi pri ni eĉ ne aŭdis. Vataĵnikov kaj Eŭtimio estas ŝtonoj, ne perfidos eĉ sur pendigilo, eĉ sur fajro. Pro nenia kruela torturo ili parolos. Kaj se la vojevodaj hundoj, kiuj mem eksciis pri Andreĉjo-servutulo, eĉ kaptos min, — mi neniun perfidos. Ĉu komprenis vi?

— Komprenis.

— Nu, adiaŭ, Atanazio Petroviĉ, ĝis bona horo.

— Adiaŭ, amiko.

— Eble, ni revidiĝos.

— Eble.

Silentulo plonĝis en truon inter putraj, glaciiĝintaj traboj de palisbarilo. Kolere ekbojis ĉenhundo, kun sonoro ŝutiĝis ie pendoglacioj, kaj ĉio eksilentis. «Ĉu mi revidos lin? — pensis Atanazio Petroviĉ. — Ĉu ankaŭ lin oni kaptos? Eble, ne kaptos?»

Kun peza koro li revenis al si en la doganan tenejon.

6. Pli da tiaj oficiroj!

Ĝuste en tiu sama tempo kapitan-komodoro Ievlev estis skribanta leteron al Moskvo — al Apraksin Teodoro Matejeviĉ.

«Kara kaj plej respektinda kavaliro sinjoro Apraksin!

La loko por la citadelo estas difinita kun tuta diligento helpe de sinjoro Jegoro Rezen[89], kiu estas inĝeniero plej inda. Serĉi lokon por konstruado de ĉi afero — ne estas facila evento por ni, frostoj furiozas kaj neĝo estas tre abunda, sed ni — disĉiploj de la bombardisto, pasis kun li kaj fajrojn kaj akvojn — ne plendas. Mi petas vin pro nia kora amikeco: se vidos vi hodiaŭ la bombardiston, petu lin kiel eble plej senprokraste pardoni kaporalon — iun Krikov-on Atanazion. Rememorigu, ke pri ĉi kaporalo petis la Siron nia forpasinta generalo Gordon Petro Ivanoviĉ, ĉar Krikov netolereblan ofendon ricevis de koruptulo-fremdulo, kiu estis al Gordon proksime konata. Kiel mi memoras, la Siro samtiam promesis al Gordon la menciitan Krikov-on promocii, sed fortas la fremdlanda Kukujo — la ukazo eĉ ĝis nun ne estas. Sed se eblas la bombardiston ne maltrankviligi per ĉi afero, tiam vi mem ĝin aranĝu, — mi

89 Jegoro Rezen — tia estis nomo de inĝeniero Georg Rese (1673 – post 1724) en la rusa servo. *(trad.)*

estas en ekstremo, malmulte estas oficiroj spertaj kaj honestaj. Menŝikov-on peti ne indas. Li kvankam pro la malnova amikeco konsentus, tamen sen donaco, verŝajne, forgesos. Savu lin Dio, oni malbone diras pri li, tro avidas. Vi konsilu al li, sinjoro Apraksin, gardi sin, la bombardisto hodiaŭ estas kun klabo, sed morgaŭ povos esti eĉ kun tiu toporo, kiun li aĉetis en Mitavo kaj diris ĉe tio: «Jen aĵo por repago al niaj malamikoj». Klabon eblas forgesi, sed hakilo dufoje ne diras, kiel sinjoro Romodanovskij bonvolis ŝerci. Ho, veas mi pri nia Aleksaĉjo, maltrankvilas mi pri li per la koro. Ankoraŭ mi petas, Teodoro Matejeviĉ, viziti mian Manjon kaj la filinojn, eksciu pri ilia vivo, ŝajne ne ĉio tie estas en ordo, eble estas iu bezono, ne rifuzu klopodon en la kancelario, ke oni almenaŭ miajn oficvojaĝojn al ili pagu, ne mortu ja ili pro koruptuloj kaj fiskoŝtelistoj. Ankoraŭ urĝu, Teodoro Matejeviĉ, ĉi tien la trajnon kun pulva provizo kanona, kaj ankoraŭ ŝtopileltirilojn kaj pulvopuŝilojn, kiuj estis antaŭ nelonge faritaj. Kien oni ilin al diablo sendis, ĉu ne al Taganrogo? Ankoraŭ mi petas, ne koleru, ke tiom multe da petoj por vi mi havas, mi petas — sendu kun oportuna okazo, kiu estos por la ŝipkonstruejo, diversajn librojn bonajn. Sed nur sen tia malhonesta mensogo, kiel la libro de Johano Korb, kie ni ĉiuj rusianoj en tre ridinda aspekto estas prezentitaj por konsolo al turkoj kaj svedoj, ke kvazaŭ eĉ militi kontraŭ ni ne necesas — ni por nenio taŭgas.

Ankoraŭ mi skribas al vi, ke en la ŝipkonstruejo Solombala la aferoj iras kontentige, kvankam homoj tie, same kiel antaŭe, estas tenataj pli malbone ol brutoj. Kiom da fojoj mi kun vi pri ĉi objekto havis konversaciojn, ho, Teodoro Matejeviĉ, kiel ni gardu laborantajn homojn de krueleco, de ŝtelado kaj arbitro de estrantaj sinjoroj? Baĵenin en Vavĉugo pro grandaj profitoj siaj

tute la racion perdis, ĉi tie li estas granda persono kaj kun li pri nenio disputi eblas. Li ankoraŭ tolan fabrikon konstruis, mem kanonojn gisas por ŝipoj kaj faras fortajn ekscesaĵojn super homoj.

Tamen tro multe mi skribas. Riverencu de mi al tuta nia glora kompanio, menciu min, malindan, kiam vi ludos kun Bakĥo kaj kontraŭ «Ivaĉjo Ebria» batalos ĝismorte...»

Silvestro Petroviĉ sigelis la leteron, levis al Jegorĉjo la lacajn okulojn, demandis, ĉu ĉi tie estas Semisadov. Jegorĉjo respondis, ke li estas ĉi tie, delonge atendas.

— Voku!

La ferdekestro eniris, salutis, eksidis sur la benkon.

— Kial vi kiel lupo rigardas? — demandis Ievlev.

— Ĉar mi ne kokino naskiĝis! — enigme respondis Semisadov.

Silvestro Petroviĉ silentis iom, alŝovis tabakon al la ferdekestro.

— Trovis mi por vi aferon! — diris li iom poste. — Sufiĉas al vi eviti laboron...

— Kian tian aferon? — demandis Semisadov.

— En konstruado de la fortreso — kiel dekestro.

— Tio por ke mi estu kontraŭ la homoj kiel ĉenhundo?

— Ja atendu vi! — subridis Ievlev. — Atendu insulti. Aŭskultu...

— Sed kion mi aŭskultu? Alpelis vi popolon preskaŭ el la tuta Blankmario, inoj ploregas, viroj insultas, ĝemado ĉie estas,

sed vi — kiel dekestro...

— Sed ja konstrui la citadelon necesas?

— Nu, necesas!

— Kiel do ĝin konstrui?

Semisadov silentis, snufadis per la pipo.

— Ĉu vi ne scias, kion respondi? Jen kapo! Ĉu vi ne iros kiel dekestro?

— Mi ne sukcesos, Silvestro Petroviĉ! La homojn mi tro kompatas!..

— Kompati — estas afero simpla...

— Oni min ne aŭskultos...

— Se kiel dekestro vi ne iros, mi prenos vin kiel helpanton...

La ferdekestro strabis al Ievlev, sed silentis.

— Fajroŝipojn ni konstruis, bruligantajn ŝipojn, jen pri tio vi estos helpanto. Ĉu vi iros?

Semisadov respondis ne tuj:

— Brulŝipojn konstrui mi povas.

— Jene.

— Ĉu morgaŭ mi venu al la loko?

— Jes, morgaŭ venu.

Post Semisadov Ievlev parolis kun la Donaj ŝipmajstroj, demandis, kiel ili kutimas surŝuti riverajn buŝojn, kiaj en Dono por ĉi afero estas ruzaĵoj kaj artifikoj. Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ enmiksiĝis en la konversacion. El la citadelo venis rapidmova, fortmuskola, kun mokemaj okuloj inĝeniero

bremenano Jegoro Rezen. Ievlev komencis traduki al li tion, kion estis dirantaj la donanoj: Rezen insiste lernadis la rusan lingvon, sed estis ankoraŭ ne ĉion komprenanta. La kozakoj parolis solide, videblis, ke la aferon ili scias bone. Unu nigra, grandokula, kun peĉkoloraj maldikaj lipharoj, plendis:

— Vi ordonu, sinjoro kapitan-komodoro, doni lignon al ni, ni en nia maniero ŝipon konstruos. Ne kredas oni al ni en la ŝipkonstruejo. Kaj alveturis ni ĉi tien ne por dormi sur forno, Apraksin ordonis al ni en nia konstruejo ŝipon konstrui. Jen Ivano Kononoviĉ, la plej estimata majstro, diras: necesas elprovi la Donan ŝipon. Sed la fremdlandano ridas, hundo, senhonorigas nin...

En ekscitiĝo li insultis.

En la ĉambro ekparolis ĉiuj samtempe: Rezen komencis demandi, kia estas la Dona ŝipo, la kozakoj komencis fanfaroni pri sia ŝipo kompare kun la blankmara barko, Ivano Kononoviĉ mansvingis al ili, — ĉu eblas kompari, ni sur glacioj iradas, ĉu vi povas nin atingi...

Pli malfrue, proksime al la frue venanta norda nokto, Silvestro Petroviĉ kun Jegorĉjo sur du ĉevaloj veturis inspekti gardantarojn — kiel gardas la pafista regimentestro de la svedo. La vintro turniĝis al printempo, frosto jam ne tiel bruligis, kiel en januaro, sed tamen estis ankoraŭ malvarme. Flavaj steloj estis flagrantaj en la fora nigra ĉielo, en kortoj de fremdlandanoj estis pigre bojantaj mastifoj, kraketadis neĝo sub la hufoj de la malaltaj nordaj ĉevaloj. La gardantaroj vigilis bone, vokadis el malproksime:

— He, haltu! Kies homoj vi estas?

En la doganeja korto, sub la flagranta stela ĉielo, malgraŭ la malfrua tempo, kaporalo Krikov estis faranta kun la soldatoj ekzercojn en la nova maniero, kiel ordonis Silvestro Petroviĉ: anstataŭ malnovaj komandoj pri dek kvin agoj — nur tri. En la korto, en seka gaja frosta aero, estis klare kaj laŭte tondranta la voĉo de Atanazio Petroviĉ:

— Agloj, aŭskultu mian komandon! Antaŭe estis: levu muskedon al buŝo, priblovu kulason, prenu ŝargon, mallevu muskedon, ŝutu pulvon en kulason, fermu, forskuu, metu kuglon, metu ŝtopaĵon, elprenu kuglopuŝilon, puŝu kuglon kaj ŝtopaĵon ĝis pulvo. Nun estos unu vorto: ŝa-argu! — Kaj poste: — Celu! Pafu!

Jegorĉjo diris flustre:

— Pure ili faras, Silvestro Petroviĉ, kvankam ili estas nur doganaj militistoj. Kaj kun racio...

La doganistoj estis lernantaj pafi per plotonoj: unu vico estis pafanta stare, la alia antaŭ ĝi sur unu genuo estis ŝarganta. Ili pafadis ankaŭ per faloj — ili faladis, leviĝadis, ree faladis.

Krikov, rimarkinte la rajdantojn, aliris, konfuziĝis:

— Kion ni tage ne sukcesis, tion ni nokte ĝisfaras, sinjoro kapitan-komodoro. Ne sufiĉas tago por ekzercoj. Alia nun estas pafado, alia estas batalordo. Miaj knaboj mem deziras, — pri la svedo ĉiuj aŭdis...

— Donu al ni Dio pli da tiaj oficiroj! — mallaŭte respondis Ievlev. — Donu Dio, Atanazio Petroviĉ...

Krikov tute konfuziĝis, staris, rigardante flanken.

Ievlev kaj Jegorĉjo forveturis, klakis la hufoj trans la

palisbarilo. Krikov, revenante al sia militistaro, pensis: «Kiam ni disbatos la svedon, taŭgos mia ekzercado ankaŭ por alia afero. Eble, vere — trovos ni mem nian justecon...»

Li trapasis antaŭ la vico, mallonge ordonis:

— Preparu! Ŝargu! Faru rapide, agloj!

Ĉapitro dua

La devo via — leĝojn gardi,
Ignori rangon de fortul',
Per help', defendo prizorgadi
Vidvinojn, orfojn — jen postul'.

Derĵavin

1. Morti prepariĝis

La viroj prepariĝis morti sen ŝercoj.

La edzinoj ploregis. Estis terure vidi, kiel la edzoj — sanaj, barbaj, ruĝvangaj, tiuj povus vivi longe, — subite alportis en la domon ĉizitajn pezajn ĉerkojn por si mem.

La edzino de Longinov, Eŭtimia, eklamentis, ĵetis sur la plankon malplenan poton, ĝi dispeciĝis. La infanoj — filo Aleĉjo kaj filino Liza — kun intereso enrigardis en la ĉerkon, kio estas tie interne. El la ĉerko estis venanta odoro de freŝa pino.

— Sternu! — ordonis Longinov.

— Kion sterni do? — ŝrikis Eŭtimia.

— Oj, Eŭtinjo! — kun minaco en la voĉo diris Longinov.

Fraŭlo Kopilov, spiregante, trenis la duan ĉerkon — glacikovritan, odorantan, same elĉizitan en tuteca pino. Forĝisto estis helpanta al li. Eŭtimia, furioziĝinte, prenis en la manojn balailon, kriis stride:

— Foriĝu tuj, ke mi ne vidu ĉi aĉaĵon! Portu for la ĉerkojn, alie mi per bolakvo brogos, mi ne scias kion mi faros!

Longinov eksidis al la tablo, apogis sin per la mano, Forĝisto fulmis al Eŭtimia per la okuloj, ŝi ne ektimis, svingis la balailon. La infanoj, Aleĉjo kun Liza, malferminte la buŝojn, rigardis el angulo al la furioziĝinta panjo, al la kvietiĝinta patro. La viroj konsiliĝis. Forĝisto proponis iri morti en la domon de Kopilov, li estas fraŭlo, tie neniu malhelpos al la sankta afero.

— Ne estas hejtite ĉe li! — diris Longinov. — Mi frostiĝos dekfoje ĝis la lasta juĝo. Ne iros mi!

— Ni hejtos! — promesis Forĝisto. — Sed eĉ se ne hejtos — estas tutegale. Pri kio vi pensas, malpiulo.

— Ni hejtos, ni hejtos! — kriis Eŭtimia. — Kies domo, ĉu lia? Li estas parazito, sentaŭgulo, Teodozo damnita, de ĉiu laboro foriris, evitulo, satano, nur unu aferon li scias — bonajn homojn konfuzi...

Kaj ŝi ree ekiris kun la balailo al Forĝisto.

Li eliris sur la peronon, por eviti malbonon, haste preĝis, por ne bati la fian inon. Sed pro la preĝo la animo ne faciliĝis. Li kolere pensis: «Ĉu estas mi — parazito? Tiom labori, kiom mi, — neniu fiŝisto eltenus. Parazito! Ĝisvivis mi! Nu, kiam mi mortos, tiam vi rememoros...»

Ili devis porti la ĉerkojn en la nehejtitan, malvarman domon de Kopilov. Dum ili laboris — starigadis la ĉerkojn sur benkojn kaj tablojn, — ŝvitiĝis, Longinov gajiĝis, diris al Forĝisto:

— Eŭtinjo ja mia! Ĉu? Ora edzino! Timigis vin per balailo...

Forĝisto kolere diris «hm!» — nun ne indis babili troe. Kopilov blovekscitis fajron en la forno. Aleĉjo kaj Liza,

nudpiedaj, alkuris ĉi tien sur neĝo — rigardi, kiel la viroj intencas morti, staris ĉe la sojlo, bluiĝinte pro malvarmo, puŝadis unu la alian per la kubutoj.

— He, geknaboj! — diris Loginov. — Kuru fluge al panjo, ŝi iun maton donu — sterni...

Aleĉjo kaj Liza staris senmove.

— Nu bone, ne necesas! — suspiris Longinov.

Brulŝtipoj en la forno ekbrulis, Kopilov ien forkuris. Longinov kaj Forĝisto sidis unu kontraŭ la alia, suspiradis. La infanoj moviĝis pli proksime al la fajro, interflustradis. Forĝisto elprenis «Libron de kredo» — komencis laŭtlegi vortojn:

— Same li, Maksimo Greko, pri la zodiako kaj planedoj diras: ĉiu kredanto al astrologio kaj planedoj kaj al ajna nigra magio — damnita estas. La libroj de Krizorojo apokrifaj damnitaj estas. Leĝorompa testamento papa de Petro Mongo, Formoso kaj herezulo Konstanteno Kovalino ikonoklasto — damnita estas...

Kopilov plu ne venadis.

— Severa estas via libro, — eldiris Longinov, — insulta!

— Silentu! — ordonis Forĝisto.

— Sed kiun oni en ĝi insultas — ne estas klare, — ree diris Longinov. — Kiel oni diras: sen vino — sen kompreno...

— Vi aŭskultu humile! — ordonis Teodozo.

Longinov ekdormetis, li dormis nelonge, vekiĝis pro tio, ke kun bruo malfermiĝis la pordo: Kopilov, ruĝiĝinta pro kurado en frosto, alportis stofon da alkoholaĵo, panon, fumaĵitan fiŝon.

Forĝisto deziris skoldi, Kopilov ne permesis:

— Ne bruu! — diris li severe. — Ni, frato, ne estas piuloj, ni estas pekuloj. Hodiaŭ ni en ĉerkojn memvole kuŝiĝas, kion vi ankoraŭ bezonas? Vi mem ne drinku, sed nin ne devigu. Kaj en libroj viaj nenio pri ĉi afero estas dirita — eble, Elio kun Ĥanoĥo mem drinkis...

Forĝisto kraĉis, forturniĝis flanken, ne rigardis. Longinov kaj Kopilov drinkis po kruĉeto, komencis disputon, kiel necesas preni marhundon, per kia instrumento estas pli oportune. La infanoj, varmiĝinte ĉe la forno, ekdormis, Longinov ne sukcesis veki ilin, envolvis en kitelon, ekportis hejmen.

— Eĉ en ĉerkon kuŝiĝis, sed plu vinaĉon drinkas! — diris en kolero Eŭtimia. — Aliaj havas edzojn, sed mi sola, malfeliĉa, suferas kun vi, aspido...

Longinov suspiris: kompatis Eŭtinjon.

Sur la forno ekploregis la vidvino de la forpasinta frato. La infanoj vekiĝis, same ekploris. Longinov aŭskultis, aŭskultis, poste kaptis sian kapon, kriis per furioza voĉo:

— Ne mortos mi, silentu! En la maro mi tian ne aŭdis, kiel en la domo...

Eŭtimia tuj ĉesis insulti, metis por la edzo bovlon da brasiksupo, tranĉis panon. Rigardante, kiel li manĝas, ŝi viŝadis rapidajn larmojn:

— Ĉu ne plu vi mortados, Nilĉjo?

Li silentis.

Eŭtimia promesis:

— Nu, se ŝoviĝos ĉi tien via piulo, viva ne foriros...

Forĝisto kun Kopilov atendis longe. Longinov plu ne venadis. Kopilov larĝe oscedis, ĵetis en la ĉerkon la peltjakon, kuŝiĝis. Forĝisto kuŝiĝis en la apudan, per animŝira voĉo komencis kanton:

Antikva pina ĉerko
Por mi farita estas...

Kopilov ree oscedis.

— Vi ne oscedu, — kun la plej ebla humileco diris Forĝisto. — Vi kantu kun mi...

— Mi, ŝajne, ne dungiĝis kiel kantoro...

— Ne parolu...

— Ja kial ne paroli por la fino. Tie ni sufiĉe silentos.

— Hundo! — insultis Forĝisto.

— Mi estas hundo, sed ne bojas, dum vi estas piulo, sed bojas...

Per tremanta pro furiozo, alta voĉo Forĝisto ekkantis mem:

Mi kvankam peka estas,
Al Dia iros juĝo...

— Oni tie laciĝis atendi vin, — diris Kopilov kun moko. — Verŝajne, lamentas: kaj kie li estas, nia kara Teodoĉjo?

— Liberigu min de peko! — petegis Forĝisto. — Ja mi vin murdos...

— Ja mi nur por konversacio...

Kaj iom poste demandis:

— Ĉu ni tiel dum dormo mortos? Aŭ kiel ĝi estas farata?

Teodozo ne respondis, nur snufis kolere.

Vekiĝinte, Kopilov koleriĝis, ke li frostiĝis en la ĉerko, la frosto estis serioza.

— Iru, trovu brulŝtipojn! — ordonis Forĝisto.

— Kaj vi tiutempe mortados?

— Estas mia afero...

— Ni manĝu ion? — kun dubo en la voĉo diris Kopilov.

Li serĉis hakilon kaj eliris en la korton.

Matene la Longinov-aj Aleĉjo kaj Liza alkuris rigardi, kiel la najbaroj mortas. Forĝisto, kuŝante en sia ĉerko, estis kolere preĝanta, Kopilov ne estis en la domo. Liza kuraĝiĝis, aliris al Forĝisto pli proksime, demandis per alta voĉeto:

— Oĉjo, kaj kie estas nia najbaro — Stefano Nikolajeviĉ?

Forĝisto respondis sendezire:

— Brulŝtipojn li iris haki, tro malvarmas...

— Kaj nia paĉjo retojn riparas, — penante transfleksiĝi la randon de la ĉerko, diris Aleĉjo. — Panjo lian veston tutan kaŝis, por ke li morti ne iru.

Vespere Forĝisto elgrimpis el la ĉerko, komencis pro malvarmo danceti en la domo. Kopilov ne venis. Neniom varmiĝinte, Forĝisto frapis al la domo de Longinov, Eŭtimia lin ne enlasis. Necesis foriri, serĉi aliajn virojn, denove prepariĝi al la morta horo. Dirante preĝon kontraŭ malica tento, surĵetinte sur la dorson maldikan dorsosakon, Forĝisto ekpaŝis sur knaranta neĝo laŭlonge de la vespera strato. Apud la

Komerca korto li renkontis Kopilov-on — tiu estis kuranta laŭ pado, zorgigita, kun seka fiŝo sub la akselo. Forĝisto, ekvidinte la fuĝulon, ne retenis sin, insultis lin per pekaj vortoj. Kopilov diris responde:

— Hodiaŭ, frato, ne eblas morti tiel simple. Al la domoj soldatoj ekiris, popolon prenas — citadelon konstrui kontraŭ la sveda armeo. Ĉiujn ili prenas — tute. Se iu estas preta mortinto — tiun ili ne tuŝos, sed kiuj ankoraŭ atendas la lastan juĝon — tiujn ili prenas. Antaŭ nelonge en la bazaro oni diris, mi aŭdis: Tadeĉjon Skidnev-on oni prenis — li ses tagojn en ĉerko kuŝis.

Forĝisto aŭskultis morne, al Kopilov ne rigardis.

— Kiel ni faros? — demandis Kopilov.

— Mi ja foriros de ili! — diris Forĝisto. — Kaj vi kiel — estas via afero.

— Ne foriros! Ĉe la bariero oni prenos.

Forĝisto kuntiris la brovojn, ekiris sian vojon.

2. Por kio homon murdis?

Ĉefepiskopo Arĥangelska kaj Ĥolmogora Atanazio oferis por konstruado de la Novdvina fortreso ĉiujn provizojn, restintajn post konstruado de muroj de la Pertomiska monaĥejo.

Ievlev aĥis: kie preni homojn, por ŝarĝi ŝipojn, veturigi mare, elŝarĝi?

Homoj mankis. Al la konstruado oni prenis ĉiujn, kiuj povis moviĝi, — de infanoj ĝis maljunuloj. Tage kaj nokte en Arĥangelskaj, Ĥolmogoraj, Onegaj, Mezenaj domoj iradis patroloj de pafistaj kaj dragonaj regimentoj, kun peza koro

peladis la popolon labori en la citadelon. Ĉevalaj heroldoj per raŭkiĝintaj gorĝoj elkriadis en apudurboj kaj vilaĝoj ukazojn: fuĝintojn de la fortresa konstruado preni vivajn, bati per bastonoj, veturigi al la citadelo. Kiu fuĝos duan fojon — al tiu oni elŝiros la naztruojn, la trian — ekzekutos morte. Sed tamen oni fuĝadis en forajn, perditajn en pinglarbaro Buŝ-Vagajn ermitejojn, al Umbo, al Varzugo, saviĝadis de kruela morto en trabaj kaŝitaj ĉeloj, preĝadis dufingre, legadis malnovpresitajn librojn. En Pustozersko, en Laptoĵno aperadis maljunuloj, malbenadis Petron kiel Antikriston, bruligadis sin en preĝejoj sub okpinta kruco[90].

Kancelariano Molokojedov ĉiutage venadis al Ievlev kun denuncoj, timigadis: jen apud la urbo rajdistoj kaptis vagulojn kun arkebuzo kaj pikstangoj, tiuj senfamiliaj vaguloj iris kvazaŭ por adori sanktrestaĵojn de Zosimo kaj Sabateo, sed iris laŭ vojo al Zolotico, — kial tiel? Jen rakontis unu fidela denuncisto, kvazaŭ li aŭdis, ke oni intencas mortigi lin, kapitan-komodoron Ievlev-on; jen rabistoj kaptis sur vintra vojo intendanton de Baĵenin, forhakis al li per sabro la kapon, skribis ĉe li letereton kun ribeligaj vortoj, ke kvazaŭ tiel al ĉiuj estos, kiuj per la Antikrista sigelo estas markitaj. Ankoraŭ vagas ĉi tie vagabondoj, kriplaj senhejmaj senfamiliuloj, pasantaj homoj. De ili oni ne atendu bonon — atendu malfeliĉon.

Ievlev aŭskultadis la kancelarianon mokeme, al nenio

90 En la Moskva Koncilio de 1654 patriarko Nikono atingis decidon pri anstataŭigo de la tradicia rusa ortodoksa okpinta kruco per la sespinta, kio kun aliaj reformaj decidoj (interalie pri krucosigno per tri, sed ne du fingroj) kaŭzis la skismon de la rusa eklezio. Preĝejoj sub okpinta kruco — preĝejoj de la malnovritanoj. En la 17–19 jarcentoj okazadis kolektivaj memmortigoj de malnovritanoj, plej ofte sinbruligoj. *(trad.)*

kredis, unufoje malgaje ŝercis:

— Ĉu la princon sur lancojn? Ne eltenos la lancistoj. La lancoj tuj rompiĝos...

Laŭ la bigota vizaĝaĉo de la kancelariano li komprenis — tiu rerakontos, kaj tute koleriĝis:

— Diablo scias kion vi diraĉas, kancelariano. Vi mem ektimis kaj la popolon timigas. Al mi kun tia galimatio ne plu venu. Senfamiliuloj, vagabondoj... Aferon vi, diabloj, ne havas...

Kiam li ekveturis al la ĉefepiskopo al Ĥolmogoro, en griza, malserena tago, — subite sub la sledon ĵetiĝis iuj du, malantaŭe ekfajfis kobolde la tria, la ĉevaloj impetis flanken de la vojo, fiksiĝis en neĝamaso. Ievlev iĝis malproksime elĵetita el la sledo, sur lin surfalis fumodora malforta viraĉo, ĉiam penadis premi la gorĝon. Silvestro Petroviĉ elturniĝis, mem kaptis la rabiston je la ŝultroj, premis sur la maldikan kokan gorĝon. Jegorĉjo trans pino pafis per pistolo. Silvestro Petroviĉ leviĝis, skuis sin. En la neĝo estis senmove kuŝanta la vireto, levinte supren sian barbeton. Ievlev subite ektimis la mortigon. Jegorĉjo kun tremanta makzelo estis diranta al la koĉero:

— La pistolo krevis je pecoj. Ĉu vi vidas? Estas bone almenaŭ, ke min ne mortigis...

— Ekstaru, vi! — malcerte diris Ievlev al la vireto.

La viro ne moviĝis, ne spiris. Lia raspa pro kaloj kaj skrapvundoj mano falis sur la puran neĝon, la kvieta sensanga vizaĝo kvazaŭ estis riproĉanta: «Kion vi al mi faris, oficiro? Malbone vi faris!»

Silvestro Petroviĉ, paliĝinte mem ne malpli ol la viro,

malleviĝis antaŭ li sur la genuojn, komencis froti lin, skui, levis la vilan kapon, sendis Jegorĉjon al la sledo por vodko. La viro singultis, malfermis la infanajn okulojn.

En pinaj branĉoj, supre, estis streĉe krianta korniko, kvazaŭ damnante en sia lingvo.

— Kial do vi, stultulo jena, — diris Ievlev. — Kial vi rabas? Via animo apenaŭ en la korpo sin tenas...

La lipoj de la viro kurbiĝis, li diris apenaŭ aŭdeble:

— Ni estas fuĝuloj... De la ŝipkonstruejo. Oni batadis nin tie — tridek knutojn... Antaŭe ni sanaj estis, bonaj...

— Ekstaru, vi malvarmumos! — konsilis la koĉero.

La viro sidiĝis sur la sledon, demetis de si truitan ŝtofzonon, donis al la koĉero:

— Ligu min, jen... Kial sen tio...

Al Ievlev spasmis la gorĝo — tia terura senelira malespero blovis de tiu gesto: ligu min. Mallaŭte, apenaŭ movante la lipojn, la viro aldonis:

— Ĉu mi povas lukti kontraŭ vi. Vi, verŝajne, eĉ panon manĝas...

— Iru de ĉi tie al diablo! — dise prononcis Ievlev. — Ĉu vi aŭdas?

— Do kiele? Ĉu vi min pardonas? — demandis la viro.

— Iru, iru! — urĝis la koĉero. — Nu, for, antaŭ ol mi per la kondukilo vipis!

La viro leviĝis, prenis de la neĝo sian ŝtofzonon, la ĉapeton, demandis per alta voĉo:

— Do, ĉu pardonas?

Lia barbeto estis skuiĝanta, la okuloj brilis per kolero.

— Ĉu kristane, jes? Malpuriĝi vi ne deziras pro via bojareco?

Li turniĝis kaj ekiris, enfalante en neĝon jen per unu piedo, jen per la alia, balbutante:

— Nu, ne malpuriĝu, ne necesas, — nu, kaj ne necesas...

Li foriris malproksime kaj de tie, el la arbaro, kriis:

— Tamen mi al vi, sinjoro, ne pardonas. Ĉu vi aŭdas, he, ne pardonas! Ni ankoraŭ renkontiĝos...

Ĝis Ĥolmogoro ili veturis silente.

3. En foraj landoj

Eminenco Atanazio longe ne akceptadis.

La ĉefepiskopaj sekvantaranoj — servisto, kaj asistanto, kaj sakristiano — estis interflustrantaj pri io; subdiakono, korpulenta viro kun vizaĝo, kvazaŭ brogita per bolakvo, dufoje eniradis la dormoĉambron, reaperadis kun riverenco, humile informadis:

— Ankoraŭ, mi petas, atendu, sinjoro...

— Mi atendos! — konsentadis Ievlev.

Li atendis la estontan konversacion kun scivolemo: kvankam li vidadis antaŭe la eminencon, tamen bone paroli kun tiu li ne havis okazon, sed oni rakontadis pri la maljunulo diversajn aferojn. La skismanoj anatemadis lin, malamis ekde

tiam, kiam en ardo de disputo, en la Faceta Palaco, en Moskvo, li enmiksiĝis en interbatiĝon en ĉeesto de carino Sofia. La klerikoj, proksimaj al la kortego, opiniis Atanazion kampulo kaj krudulo, sed caro Petro, sendante Ievlev-on en Arĥangelskon, ordonis firme:

— Konsilanto por vi estos Atanazio Ĥolmogora. Li havas saĝan kapon. Al li kredu. Li estas frotita kaj polurita, ĉion vidis, mi fidas lin...

Li pensis iom kaj aldonis:

— Se li estus pli juna kaj ne ĉefepiskopo — estus laboranto. Tian eblus fari vojevodo aŭ eĉ pli alte. Li estas tre honesta kaj rektanima, estus bona generalo, — netimema maljunulo...

Atanazio eliris al Ievlev — tute kiel kampulo, kvankam en silka, longa, ĝis genuoj ĉemizo, nekombita, morna. Silvestro Petroviĉ intencis kisi la manon, Atanazio tute kvazaŭ koleriĝis:

— Lasu, por nenio! Mi kiom da tagoj, vinon drinkante, pekas...

Ievlev ne povis kaŝi miron, Atanazio subridis:

— Kial vi rigardas? Ne kredas? Mi ne kaŝiĝas, ĉiuj pri mi scias. Ŝajne, de la dimanĉo mi komencis kun ili, kun la propruloj. Tre postebriaj ni hieraŭ estis, nur nun rekonsciiĝas, en banejo ŝvitbaniĝis. Ni iru en la ĉambrojn, konversaciu. Vi, mi pensas, post la vojo rejnvinon drinki ne rifuzos? La vino estas bona, malnova, mi ĝin ŝatas...

La servisto kun timigita kaj riproĉanta esprimo de la pala vizaĝo alportis sur granda kupra pleto orajn nielitajn botelojn, sukcenajn tornitajn kalikojn, migdalon sur Venecia maldikvitra telero. Atanazio mem fermis per brokaĵaj kurtenoj la angulon

kun ikonoj de Johano la Apostolo, de Pasiono, de Anunciacio.

— Ne indas, ke ili vidu...

Dum Atanazio garde, por ne skui, disverŝadis la malhelrubenan vinon, Ievlev, kvazaŭ en distriĝo, rigardadis titolojn de libroj, kuŝantaj sur la tablo. Tio estis «Edifoj pri invado de barbaroj», «Juro, aŭ Statutoj militistaj», «Pri civitana vivo, aŭ pri direkto de ĉiuj aferoj, komunaj al la popolo»...

— Kial vi rigardas? — demandis Atanazio. — Jen, mi legas, drinkas vinon kaj legas. Sed ĉi tie estas pli multe da sensencaĵo, ol da afero, — cerbumado de stultuloj! Vante ili skribas. Vergilion almenaŭ eblas legi, sed tiuj ĉi muelas akvon. Drinku. Maljuniĝis vi, — mi memoras, memoras vin sur la jaĥto cara, kaj ankoraŭ memoras, kiel mi vin unuafoje ekvidis. Vi rigardas bone, rekte, — malfacile por vi estos la vivon travivi...

Per etaj glutoj li ĝuis la vinon, ĵetadis en la buŝon migdalojn, maĉadis per fortikaj blankaj dentoj.

— Vidis mi, ordigis vi la urbon Arĥanĝelan, bona nun iĝis la urbo, patroloj iradas. Simono Borisoviĉ, la pafista kolonelo, eĉ juniĝis. Mi laŭdas vin, sinjoro, laŭdas. Al la Siro mi skribis pri vi. Vi — drinku, kun mi vi povas. Por konversacio drinku, ja vi jen silentas, sed mi paroli kun vi ekdeziris, aŭskulti vin volas. Komence mi demandos, kaj vi respondu. Ĉu vojevodo Prozorovskij malhelpas al la afero?

— Dume ne tro malhelpas, mastro. Ja mi eĉ ne vidas lin.

— Li malhelpos! Skribos pri vi leterojn, misfamigos, kalumnios. Estu preta al tio. Ĉu fremdlandanoj en la urbo ankoraŭ ne komencis vin mordi?

Ievlev ekridis:

— Dume ili estas kvietaj, mastro.

— Ili atendas. Eble, pensas ili: li estos sur nia flanko. Gardu vin kontraŭ tio. Kaj pleje vin gardu kontraŭ la vojevodo. Li estas insidema kaj nocema. Kaj havas favoron de la Siro...

— Pro kio do li havas favoron?

— La pafistoj, ribeliĝinte, por ekzekuto fremdulon Franciskon Leforton postulis. Tiu Leforto nun jam ne estas inter vivuloj. Postulis la pafistoj, ribeliĝinte ĉe Azovo, ankaŭ princon Prozorovskij-on. Nu, pensu...

Silvestro Petroviĉ silentis.

— Tiu Leforto estis la unua homo ĉe la Siro. Diboĉulo franca, unika pro fideleco. Restis la alia — Aleĉjo princo Prozorovskij. La plej fidela por la Siro... Ĉu komprenis vi?

— Komprenis! — malgaje diris Ievlev.

— Estas ankoraŭ ĉe la vojevodo dumaano Larionov. Pli malbonan hundon la mondo ne konis. Tiu ĉi, timigante la vojevodon per morto, per ribelo, per lancoj, tutan potencon al si prenis; Aleksio Petroviĉ nur vodkon drinkas, kaj, estante postebria, kion la dumaano ordonas, tion faras. Kaj al Petro Aleksejeviĉ pri tio diri estas frenezo. Neniom li kredos, kaj eĉ batos. Kancelariano Molokojedov tie estas denuncisto, Abrosimov, Gusev. Vi kontraŭ ili forte vin gardu, infano, al ili oni ĉiun vian vorton rerakontos, ili ĝin distordos — kaj pereis via kapo. Malfacile por vi ĉi tie estos, tiel penige, ke ne eblas esprimi. Jes, kara, kiel vi vivos? Malfacile, por ĉiuj estas malfacile, la kapo, je Dio, iam zumas... Jen la skismuloj, ordonite estas al mi pri ili reguligi...

Subtila, saĝa momenta rideto tuŝis la vizaĝon de Atanazio, kiam li diris:

— La skismuloj ja bruligas sin, en ĉerkojn vivaj kuŝiĝas, kion ajn faras! Por kio la proda fortego foriras! Jen popolo, jen diablo, pardonu Sinjoro! Ĉi tie mi unu tian dum kvar tagoj rompas. Forĝisto estas lia alnomo, kiom da malutilo li faris al la dvinanoj — ĉiam persvadas en ĉerkojn kuŝiĝi. Miras mi pri li, pensas: se elskui el lia kapo skisman stultaĵon, sidigi sur ĉevalon, doni en la manojn sabron aŭ glavon — kion ajn li povus fari...

— Ĉu vi kun li konversacias? — demandis Ievlev.

— Ĉu eblas kun li konversacii! — subridis Atanazio. — Li insultas — kaj jen la tuta konversacio. Mi lin ankoraŭ turmentos iomete, poste al vi sendos en la Kanonan korton, li laboru... Nu, Dio estu kun li, li estas nemalbona homo, vi vidos mem. Rakontu al mi — ĉu en la transmaraj landoj vi estis?

— Estis, patro.

— Kiel estis? Ĉu kun la Granda Ambasado aŭ kiam la tablestroj veturis?

— Kun la tablestroj, patro.

— Rakontu. Mi aŭskultos. Ĉu tie estas tiom bonege, kiel iuj vantuloj babilas, kaj ĉu tiom ili nin, rusojn, superas, kiel ili mem pri tio en siaj verkoj skribas? Parolu. Kie vi estis do? En kiuj landoj? Sed antaŭe drinku jen ĉi vinon. Ĝi faciligas pensojn, malfermas la koron, se iu homo ĝis duonebrio ĉi vinon drinkos — ne povos mensogi.

Silvestro Petroviĉ ridetante trinkis kelkajn glutojn, la servisto alportis al li frititan kun nuksoj salmaĵon. Kviete, per

egalaj langetoj estis brulantaj kandeloj, ĵetante rebrilojn sur la multekostan vazaron, sur la satenan arĝentan tablotukon, sur glatajn bluajn kahelojn de la grandega forno.

— Ĉu vi lernis trans la maro? — demandis Atanazio.

— Lernis, patro. Ni studis geometrion, astronomion, meĥanikon, fortikaĵ-konstruadon, trigonometrion, en libera tempo — medicinon. Estis en multaj landoj...

— Kial vi mallonge parolas? Parolu longe. Mi scii bezonas, mi pro nescio laciĝis. Diru ĉion en detaloj. Kio estas bagatelo — mi mem komprenos, kio estas afero — mi same divenos. Drinku kaj parolu...

Ievlev ree ridetis, komencis rakonti detale. Atanazio ridadis, balancadis la kapon, gajadis. Eksciinte, ke en Holando la homoj estas plej karesaj ne al vojaĝantoj, sed al ties mono, li tute gajiĝis, kapjesis, kriis:

— Vere, vere. Talerojn al ili donu, kaj se ne donos — ne havos vi de ili gastamon.

Senhaste, glutetante la vinon, Silvestro Petroviĉ rakontis, kiel ili navigis el Kadizo, kiel la ŝipestro, eksciinte, ke la rusaj tablestroj havas malmultajn zekinojn kaj ke ili ne havas de kie preni monon, postulis antaŭpagon por veturo kaj manĝo. Ili pagis, restinte sen groŝo, kaj la ŝipestro nutradis ilin nur dum la vojo, sed dum haltoj ne donadis eĉ biskoton. Dum semajnoj kaj eĉ pli ili malsatadis, en haveno ŝtele dum tuta tago penis kaptis virkokon. Ne sukcesis, tamen la fremdlandanoj kaptis unu el la ŝteluloj, longe malhonoradis lin kaj eĉ la okulon al li difektis, — ekde tiam li malbone vidas...

— Certe, la lernado ne iris en la kapon! — diris Atanazio.

— Priŝteladis nin ĉiuj! — rakontis plu Ievlev. — Tieaj fremdlandanoj, kiam ni estis en lernado, nian monon de ambasadoroj prenadis interŝanĝe, kaj la pago estis duoble, trioble pli granda ol la veraj prezoj. Ne eblas kredi, sed krom akvo ni nenian trinkaĵon havis, la vestaĵojn kaj subvestaĵojn ni mem lavadis. Kiam ni volis ion rigardi por utilo, kion ni ne scias, — ne permesite. La sola, kio estis permesita, — aritmetiko kaj trigonometrio, kiujn ankaŭ hejme tute ne malfacile eblas lerni ĉe asidua diligento. Kelkaj homoj kontraŭ multaj taleroj povis ankoraŭ utilon al si havi, sed se laŭ nia malriĉeco, tiam la sola, kion oni al ni montradis, estis kuriozaĵoj de diversaj monstroj: dukapa bebo de ina sekso, kaj viro en alkoholo tute harkovrita, kaj ankoraŭ hepato homa en alkoholo, kaj krokodilo, kaj skorpio...

Ievlev ekridis, turnis la kapon:

— Nun estas kaj ridinde kaj mirinde, por kio la jaroj pasis! Dum tuta tago ni atendas, subite venas nia mentoro, prenas de ni zekinojn — miraklon rigardi. Ni iras, kaj kia estas la miraklo? Viro kun du kapoj, unu kapo estas kie necesas, kaj la alia el la ventro kreskas. Unu kapo nomiĝas Mateo, la alia — Johano. Kaj inter si ili konversacias per versoj. Rigardis mi, rigardis, prenis nian mentoron je la gorĝo, skuis iomete: «Por kio, mi demandas, vi al ni ĉi histrionadon montras?» Ja facile kompreneblas: du viroj en unu arta felo kaŝiĝis kaj azenigas homojn. La mentoro ofendiĝis, al la ambasadoro plendis, kaj la ambasadoro min batis al la vizaĝo.

— Mi vidas — multon vi tie lernis? — ridante demandis Atanazio.

— Se ni ion eksciadis — nur hazarde. Ni iris mare el

Kadizo, amikiĝis kun la navigisto ŝipa, ion eksciis. En la Lejdena akademio gardisto prenis de ni donacon, kaj pro tio ni vidis artojn multajn kaj metiojn, sed nur kaŝe, nokte. Nur unufoje al ni fortunis: ni amikiĝis kun fremdlandano, — estis bona homo kaj en multaj sciencoj eĉ klera. Li aŭskultadis de ni historiojn pri Rusio, ekkonadis niajn morojn, kutimojn, kiujn ni havas de la patroj kaj avoj. Kaj al ni li multajn siajn artojn montris: kiel necesas fortresojn konstrui, en matematikaj sciencoj nin multe movis antaŭen, konstruadon klarigis de elementoj, — ni ĝin kvankam lernadis dum multaj tagoj, tamen sen ajna rezulto. Forte amikiĝis ni kun li. Nun li venis ĉi tien, konstruas kun mi la citadelon, bonega laboranto — Jegoro Rezen. Nenian aferon evitas, plenumas sian vorton, da tiaj ni havu pli, sed mankas ili. Aviduloj venas, sed bonuloj ne...

La vizaĝo de Silvestro Petroviĉ iĝis afabla, estis videble, ke al li estas agrable paroli pri Rezen.

— Multan bonon por ni faris ankoraŭ Rezen Jegoro. Okazadis, ke iu deziris globuson aĉeti, aŭ astrolabon, aŭ lornon, — oni tian prezon diras, ke trafas stuporo. Sed la vendanto ridas. Via, diras, caro estas riĉa, kial vi avaras? Rezen Jegoro per piedoj stamfas al ili, vi, diras, estas ŝtelistoj, prenu ĝustan prezon, alie mi pri vi folion skribos al la reĝo... Multe da utilo por ni estis de li. La bazilikon de Sankta Marko li al ni montris, kiel ĝi estis konstruita kaj en kio estas la arto de la arkitekto. La urbon Venecion li montris, kio en ĝi estas bela kaj malbela, hospitalojn, kiuj estis saĝe konstruitaj, kaj kiuj malsaĝe. En ŝipkonstruejoj holandaj de la Orient-hinda Kompanio multajn metiojn li al ni malkovris, kaj kio estas malbona — ni kun lia helpo same divenis.

— Nu, kaj ĉu bonas en Holando majstroj? — vigle demandis Atanazio. Li estis aŭskultanta kun intereso, forgesinte pri la kaliko, plenigita ĝissupre.

— Majstrojn bonajn ili havas, la holandanoj, sed laborante tie, ĉiam mi nian Ivanon Kononoviĉ-on rememoradis kaj Timoĉjon Koĉnev-on, kiuj, matematikon ne sciante, mirindajn ŝipojn per sola sia talento kaj inĝenieco kreas. Kio do rezultos, se oni instruos homojn, similajn al ili, ankoraŭ pri matematiko. Ne malpli gloraj viroj, ol anglo Isaako Neŭtono!

— Kiu estas Isaako Neŭtono?

Silvestro Petroviĉ rakontis, ke li havis okazon vidi la bravan Neŭtonon, kiu kiel gardanto de la monfarejo estis prezentita al Petro Aleksejeviĉ kaj lia sekvantaro.

— Sed pro kio li bonas do, via Neŭtono? — malpacience demandis Atanazio.

— Pro multo li bonas! — penseme respondis Ievlev kaj nehaste, penante esprimi per kompreneblaj vortoj, komencis rakonti al Atanazio la esencon de la Neŭtona leĝo de gravito, la Neŭtonan ĉielan meĥanikon. Atanazio atente aŭskultadis, direktinte al Ievlev la saĝajn okulojn, kaj ŝajnis, ke li vidas tiujn moviĝojn de kometoj, pri kiuj estis parolanta Silvestro Petroviĉ, vidas la tajdojn, vidas la lunajn deviojn.

— Do, ĉu pri tio estas libro verkita? — demandis Atanazio.

— Verkita, mastro. En Londono antaŭ ĉirkaŭ dek kvin jaroj la tipografo eldonis tri volumojn de ĉi verko.

— Kaj kie preni ĝin? — kun avido demandis Atanazio.

— Mi ĉi volumojn alveturigis. Kaj al vi, mastro, jam

morgaŭ kun kuriero el Arĥangelsko sendos.

— Sendu, sendu! — rapide kaj same kun avido petis Atanazio. — Sendu, filo. Ho, multo estas nelegita, multo estas nesciata, tiel mi mortos en obskuro. Kaj ĉi Neŭtono — de kia stato li estas?

Ievlev diris, ke li ne scias, sed pensas — Neŭtono ne devenas de grafoj kaj princoj, li aŭskultis, ke ĉi Neŭtono en junaj jaroj estis malriĉa ĝis ekstremo, kaj siajn ekzercojn en meĥaniko komencis de amuzoj: aranĝis ventomuelilon, regatan de muso, akvohorloĝon, skutilon. Poste li komencis studi la geometrion de Kartezio kaj la elementojn de Eŭklido.

— Admirinda lertulo! — suspiris Atanazio. — Se tia al ni venus gasti, sed ne...

— Venas aliaj, — konfirmis Silvestro Petroviĉ. — Ho, tiuj venas...

— Kaj koncerne lertulojn, ankaŭ mi renkontadis tiujn, — diris Atanazio. — En la Solovkia klostro monaĥo Jeremio akvo-kondukilon metis, la akvo mem laŭ tuboj kuras, — tiele arte. Eĉ Forĝiston konsideru lokan, kiom li estas lerta kaj sperta en feraj laboroj...

Ili paroladis longe, Ievlev rakontadis pri viditaj urboj — pri Londono, pri Amsterdamo, pri Romo. La servisto ŝanĝis botelojn, pro la vino iĝis varmege. Atanazio subite demandis:

— Sed vi ja por kio al mi venis? Ĉu amuzi la maljunulon? Ĉu por animsava konversacio?

Kaj, ĉifinte la barbon en la pugno, li ĵetis ruzan rigardon al Ievlev. Silvestro Petroviĉ respondis, ke ne, li venis pro afero, peti servon, ke monaĥoj laboru por la Novdvina fortreso —

ŝtonon veturigu, kalkon, lignon. Ĉu eblas tio?

— Nu, ili veturigu. Eble, ili por la utila afero sian korpulentecon skuos, grason forigos. Mi benas.

— Do vi, patro, leteron sendus al la monaĥejestroj...

Atanazio silentis, kvazaŭ ne aŭdis.

— Plue pro kia afero vi venis? Ne silentu — parolu.

— Sonorilojn mi en preĝejoj kaj monaĥejoj demetos, — rezolute diris Ievlev. — Kiel Petro Aleksejeviĉ en la tuta Rusujo faras, tiel ankaŭ ni faros. Kanonoj necesas, patro, ni ne havas per kio defensivi kontraŭ la svedo...

— Ĉu sonorilojn demeti?

— Tiel, patro...

— Grakados, certe, la korvaro. Sed ne gravas! — penseme eldiris Atanazio. — Pura preĝo, mi pensas, eĉ sen sonorado la Sinjoron atingos...

— Mi timas, mastro, ke monaĥoj kaj popoj obstaklos. Leviĝos lamentado, por ni eĉ sen tio estas malfacile...

— Koncerne obstaklojn kaj mokadon — pli lerta ol mia nigra militistaro ne troveblas, — respondis Atanazio. — Jen, vi diras, leteron skribi. Mi sendos al monaĥejoj leteron, kaj ili ĝin deklaros anatema kaj antikrista. Iros denuncoj unu ol alia pli teruraj al Moskvo, al la patriarĥo. Pelos oni min, Dian sklavon, en foran monaĥejon kiel prioro, kaj kion vi tiam faros? Sendos oni al vi ŝtipon en sakaĵo kaj kovrotuko kun epigonacio kaj Dipatrina brustikono[91], kaj vi antaŭ li staros kiel fosto. Sed mi estas viro simpla, en Blankmario mi estas delonge, la lokan

91 Pecoj de diserva vesto de ortodokskristana ĉefpastro *(trad.)*

vivon mi de la juneco konas, sankteco en mi mankas, sed ne pri ĝi temas, se mi kun utilo vivos, tio taŭgos...

Li levis la kalikon al la lipoj, sed ne trinkis, nur trarigardis la vinon en lumo.

— Sendos vi pafistojn viajn, dragonojn, rajdistojn, — prenos monaĥojn kiom necesos. Ili iros al mi kun denunco, sed kion mi povas fari? La cara volo, aŭdis vi verŝajne sufiĉe, kion Proĥoro en Rusujo faras...

— Kia tia Proĥoro?

— Ja Petro Aleksejeviĉ. Lin en la utero patrina iu freneza profeto nomis Proĥoro... Kaj jen kion mi ankoraŭ diros, filo: vi por monaĥoj nutrajn kopekojn ne malŝparu. Mi pensas, graso ĉe ili estas akumulita ne tiom, kiom ĉe laboruloj. Kaj se necesos — la monaĥejestroj por la siaj la monsakon skuos, ja ili ne estas malriĉaj. Sed la nutran monon al kampuloj donu, kvazaŭ donace de la monaĥejoj...

Li enpensiĝis, kolere sulkiĝante, poste diris, forpelante malfacilajn pensojn:

— Ili plendu, plendu! Mi per Dia vorto ilin al humileco alvokos. Prenu monaĥojn, demetu sonorilojn, nur la malamikon ne enlasu al nia tero. La vojevodo en vian aferon enmiksiĝos, vi plu vian laboron faru, sed kun li estu kvieta, li multe povas malutili, hundo fetora. Li estas lerta, elglitema, ne kaptebla. Kaj riĉa, scias, al kiu koruptaĵon en kiu horo doni. Malutila, ho, kiom malutila.

Ievlev aŭskultis, kun intereso kaj ĝojo pririgardante la eminencon.

— Ĉu Forĝiston voki? — subite rememoris Atanazio. —

Kanonojn ja gisi el la sonoriloj necesas? Aŭdis mi, ĉe vi estas fremdlandano en la Kanona korto. La propra ja estas pli bona, kvankam aroganta! Vi kun li nur la kredon ne tuŝu, vi kun li, filo, pri la afero parolu...

Forĝisto venis, sidiĝis sur la benkon, kunmetis la manojn sur la brusto. Lia vizaĝo estis konsumita, la barbeto elstaris oblikve, la pupiloj estis kolere borantaj Atanazion. Al Silvestro Petroviĉ li eĉ ne rigardis.

— Ĉu vi atendas? Ne tediĝis? — demandis Atanazio.

— Atendas! — kun defio en la raŭka voĉo diris Forĝisto.

— Kiom ankoraŭ vi atendos?

— Ĝis la Butersemajno.

— Sed se ne venos Ĥanoĥo kun Elio, tiam kiel?

La okuloj de Forĝisto sovaĝe brilis, li forte kunpremis la manojn sur la brusto, suspiris.

— Aŭskultu, Forĝisto, — ekparolis Ievlev. — Mi pri vi scias, ke vi estas bona majstro. Granda malfeliĉo, terura ruinigo minacas al la urbo Arĥanĝela...

Forĝisto movis al Ievlev la rigardon, forturniĝis.

— Anstataŭ ol kuŝi en ĉerko, — flamiĝante kaj ekscitiĝante, parolis Silvestro Petroviĉ, — ol homojn delogi de vera laboro, vi irus al la Kanona korto kaj pri afero okupiĝus. Ĉu ne la rusa sango en viaj vejnoj fluas? La tuta kanona afero estas en la manoj de fremdulo, sed la propra lertulo, scianta tiun arton, kuŝas viva en ĉerko, por ke en ĝi la lastan juĝon atendi. Ĉu vi ne freneziĝis? Ĉu orfojn, vidvinojn, maljunulojn Arĥangelskajn ne kompatas? Respondu, kial vi silentas?

En la vizaĝo de Forĝisto nenio ŝanĝiĝis. Li forturniĝis kaj ne diris eĉ vorton.

— Forkonduku lin en la ĉelon! — ordonis Atanazio.

Forĝiston oni forkondukis. La eminenco, akompaninte lin per rigardo, diris:

— Suferi li serĉas, sed mi ne lasas. Dum kvar tagoj eĉ paneron en la buŝon li ne prenis, ne manĝas kaj eĉ akvon ne trinkas. Fastas! Ne gravas, la Butersemajno estas baldaŭ — li ne mortos... Ĉu ankoraŭ aferoj estas? Parolu rapide, alie mi guzliiston vokos!

La aferoj ne plu estis. Atanazio vokis la serviston, ordonis al li voki la avon. Venis blinda maljunulo, blankbarba, kun vizaĝo, kvazaŭ ĉizita el ŝtono, eltrinkis ĉerpilon da forta vodko, almanĝis fiŝon. La servisto donis al li la guzlion. La avo pinĉis la kordojn, ekkantis per forta malalta voĉo. Por momento al Ievlev ŝajnis, ke sub batoj de ventoj ŝanceliĝis, ekbruis jarcenta pina arbaro. Dolĉa tremo kaptis lin, sur la okuloj subite aperis larmoj. La avo kantis pri sentimaj armitaj kompanioj, kiuj iris laŭ ŝtonaj bestaj padoj al la oceano-maro, kantis pri la malvarma oceano, pri ŝipoj, kiuj tranĉas salajn malvarmajn akvojn, pri sanga batalo de prodoj. Ululadis, ĝemadis, minacadis en lia mirinda kanto la maro, al la ĉielo leviĝadis ondegoj, fulmoj fendadis nubojn, en tiuj tondroj, tempestoj kaj buraskoj certe, trankvile murmuregis la kordoj, iris la rusa homo tra ĉiuj suferoj, iris en malproksiman serenan foron. Atanazio ploris, neniom hontante pri larmoj, kapjesadis, sensone flustradis:

— Tiele, avĉjo, tiele, kara, tiele, bona...

Ievlev aŭskultis, kaj antaŭ li ial staris Rjabov, la rudristo, tia, kia li vidis lin iam sur la holmeto de la Mosea insulo: li rigardas rekte, en la verdaj okuloj tremas oraj gajaj fajreroj, la larĝajn ŝultrojn kvazaŭ ĉirkaŭverŝas la malsekiĝinta pro pluvo kaftano, trankvile spiras la proda brusto...

4. Kisu la spadon, kapitano Krikov!

En monaĥejojn soldatoj iris subridante, sale ŝercadis, ne sen ĝojo batadis per muskedoj al pezaj pordegoj. En la Nikola-Korela monaĥejo dragona leŭtenanto Meĥonoŝin, plej respekte — en la fremdlanda maniero — riverencinte al la prioro, raportis, ke la monaĥejo por konstruado de la citadelo devas doni ducent kvardek kapojn da monaĥoj.

— Kapojn? — borante la leŭtenanton per la okuloj, redemandis la prioro.

Meĥonoŝin staris antaŭ li senmove, vestita en ĉio fremdlanda, en buklita peruko, parfumita, aroganta.

— Mi kulpas, patro, mi misdiris: ne kapojn, sed ekzemplerojn.

— Ekzemplerojn? — skuiĝante per sia magra korpeto, en furiozo ekkriis la prioro. — Kion vi diras? Kiel vi arogas...

— Sed kiel do mi esprimu? — perplekse demandis la aroganta leŭtenanto. — Por monaĥo la homa estas fremda, kaj ĉu rajtas mi, pekulo, monaĥojn nomi homoj?

— Donu al li en la manon, en la manon, — li prenos! — flustris al la prioro la monaĥeja ekonomo. — Li prenos, mastro, nepre prenos.

La rigardo de la leŭtenanto estis aroganta, sed samtempe atendanta. Sed la prioro ne komprenis kaj nenion donis al Meĥonoŝin. Tiu atendis iom, kunpremis la lipojn, ordonis komenci.

Kun tamburado sub printempa pluveto oni vicigis linie ĉiujn — kaj dikajn, kaj maldikajn, kaj asketojn, kaj servistojn, kaj tiujn, kiuj ankoraŭ nur intencis monaĥiĝi. Eĉ patron Agafonikon oni starigis en la linion kun ĉiuj. Indulgis oni nur la solan prioron. Leŭtenanto Meĥonoŝin, brilante per koleraj okuloj, ludante per malgranda skurĝo, iradis de unu monaĥo al alia, rigardadis al la stultiĝintaj pro dormado kaj tromanĝado vizaĝoj, demandadis mallaŭte:

— Kaj ĉio ĉi per fasta dieto? Ĉu vi estas sana, patro?

Kelkaj plorpepadis, ke ili estas malsanaj, la leŭtenanto kredis ne al ĉiu. Ĝisirinte fortikan Barsanufon, li subridis, diris proverbe:

— Pri via sano, patro, eĉ demandi estas malfaste. Ekstaru kiel dekstraflankulo, eble, vi eĉ iĝos bona dragono.

Barsanufo ekstaris, kiel estis ordonite, dekstraflanke, glatigis la barbon. Malgranda soldato, kiu estis subridanta apude, flustris:

— Se la barbon vi razos, tute al homo similos.

Barsanufo kraĉis, sakris ne laŭ monaĥa maniero. La dragonoj ekridegis, Meĥonoŝin kriis viciĝi, poste, kvazaŭ rememorinte, ordonis al Agafoniko ekipi ĉarojn kun provianto por la monaĥoj, dume por du monatoj, kaj poste oni vidos. Ili ekiris sur la insulon, al la citadelo, antaŭ vespero. La tamburoj batis «iradon», malantaŭe treniĝis monaĥejaj ĉaroj, ŝarĝitaj per

faruno, sekigita fiŝo, butero en lignaj tinetoj. La monaĥoj paŝadis po ok homoj en linio, konfuziĝadis, puŝadis unu la alian. En paŝtejo apud la rivera transpasejo, leŭtenanto Meĥonoŝin demandis laŭte:

— Do, patroj estimataj, ĉu vi eĉ ne scias, kiu piedo estas la dekstra?

La monaĥoj silentis.

— Do levu, per kiu mano vi krucosignas!

Ducent kvardek nigraj manikoj leviĝis super la vico.

— Tiel. Ne vane, videble, en la monaĥejo vi tiom da jaroj suferis. Kiam mi diros — dekstran, tiam pensu, per kio vi krucosignas — per tio paŝu. Kaj nun... maldekstran!

La korpulentaj grasaj monaĥoj, konfuziĝante, ekpaŝis per la maldekstra, ĉirkaŭaj kampuloj kun miro rigardis, kiel oni instruas monaĥojn pri marŝado.

Ili transveturis Dvinon sur la fortresa pramo. La soldatoj ekkantis sian dragonan kanton, la monaĥoj kun timo rigardis al la proksimiĝantaj budoj kaj branĉkabanoj de la novdvinaj laborantoj.

Post Meĥonoŝin la monaĥejon vizitis la pafista regimentestro kolonelo Simono Borisoviĉ Ruĵanskij. La maljuna prioro, senfortiĝinta pro la grandaj problemoj, falintaj sur la monaĥejon, deĵetis de si la cilindran ĉapon, kriegis:

— La ĉapon prenu do, se tiel. Kovraĵojn de la sanktaj ikonoj deŝiru! Nekristanoj, antikristaj idoj, pu!..

La kolonelo respondis:

— Pro tiaj insultaj vortoj, patro, vi povas pagi. La sonorilojn

mi demetas ne por mia propra profito, sed por fandi el ili kanonojn. Sed se vi ilin bezonas, por per sonorado svedajn militistojn renkonti, tiam rekte tiel diru, — ni scios, kia vi estas birdo!

Maljunuloj ĉirkaŭe ekmoviĝis, — kiun li nomis birdo, kontraŭdiulo! Sed la kolonelo rigardis al ili sendepende, la monaĥojn ne timis. La prioro silentis, ektiminte. Ekonomo Agafoniko, vokinte la kolonelon flanken, haste ŝovis al li kudritan en la monaĥejo monsaketon kun ormoneroj. La kolonelo bruniĝis, ĵetis la monsaketon sur la teron, komencis treti ĝin per la botoj. Agafoniko tute perdis la kapon: al Meĥonoŝin li ne donis — malbone, tiun ĉi li pridonacis — ankoraŭ pli malbone...

Ormoneroj, elfalintaj el la krevinta monsaketo, plu restis kuŝi sur la degela neĝo. Simono Borisoviĉ, insultante, ekiris al la sonorilejo, post li, levinte la baskojn, hastis Agafoniko. Ĉi tie, fumante tabakaĉon, razmuzelaj, kvazaŭ mastroj, iradis soldatoj en mallongaj uniformoj. Unuj estis starigantaj eskalojn, aliaj per hakiloj ĉarpentis trabojn — por mallevi la sonorilon, la triaj estis mezurantaj per mezurilo, kiel fari la laboron. De siaj militistaj ĉaroj ili estis faligantaj marajn peĉitajn ŝnuregojn, ferajn hokojn, martelojn. La frataro estis krucosignanta sin trans anguloj, flustranta preĝojn.

Morte ektiminte tian grandegan ruinigon, la maljunaj prioroj de la najbaraj monaĥejoj kunvenis en la ĉelo de Agafoniko kaj decidis liberiĝi per pago al la damnita kapitan-komodoro Ievlev. Sekrete ili interkonsentis peti Silvestron Petroviĉ-on per monsako kun cento da bonaj oraj taleroj. La aferon devis fari prioro Doroteo — ruza, nemaljuna ankoraŭ, rufa kaj kalva viro

el Sergia malproksima monaĥejo.

Ĝisatendinte la kapitan-komodoron en la domo de Taisja, li falis antaŭ li al la piedoj, kaptis per siaj manegoj la malsekajn pro degelakvo juftajn botojn, ekploris per veraj larmoj. Ievlev deĵetis lin de si, je la kolumo trenis al la pordo, ĵetis de sur la perono en printempan humidon, komencis bati en mallumo per la piedoj. Doroteo estis grasa, mola, ŝmacadis en la flako, ojadis, ekrampis kvarpiede al la pordego. La ĉenhundoj, terure graŭlante, estis ĵetiĝantaj al la rampanta en robo grasa homo. Ievlev ĵetis post li la monsakon, promesis la sekvan senditon bati per bastonoj senkompate en la arestejo.

— Kial vi, Silvestro Petroviĉ? — demandis Taisja.

Ievlev ne respondis, frapis per la pordo, falis sur la benkon. Li tremegis, dentoklakadis, sufokiĝis. Ekde tiu tago li iĝis eĉ pli severa, paroladis tute malmulte kaj nur longe silente karesadis Ivaĉjon kaj iam, malofte, gajiĝinte, ludadis kun li.

En la Pertominskan monaĥejon direktis sin maristoj sur multaj ŝipoj sub komando de ferdekestro Semisadov. La monaĥoj tiam, ne atendante malfeliĉon, en sia foro estis distilantaj vodkon por vendo. Semisadov eksentis la leĝorompon, la monaĥoj decidis liberiĝi per granda donaco. La ferdekestro, ekvidinte dolĉajn vizaĝojn de siaj subuloj, ordonis la vodkon verŝi en la maron. Sub grakado kaj oĥado de la maristoj oni elverŝis la vodkon el la bareloj. La matrosoj koleriĝis, la sonorilojn demetis rapide, dum duontago. Samtiam estis farita elekto de la monaĥoj — kiun lasi, kiun peli al laboro. Rezultis cent tridek bonaj laborantoj, bone nutritaj kaj sanaj. Dum ili iris mare en bona vetero, la maristoj entreprenis sur kelkaj ŝipoj lukti kontraŭ la monaĥoj. Sur unu barko oni

preskaŭ falis en la akvon, sur la alia bonsana monaĥo tiom ardiĝis, ke kune kun kanonisto elfalis trans la ŝipflankon kaj en la akvo plu kriis: «Ĉu vivon aŭ morton?» La matrosoj krevis pro rido, apenaŭ troviĝis unu, kiu komprenis treni la dronantojn per hokstango.

Kune kun la monaĥoj en la fortreson estis liveritaj ŝtono kaj kalko, brikoj kaj segita ligno, ĉarpentitaj platoj kaj argilo. Kun longa malgaja zumo oni kunrulis en la Kanonan korton grandajn kuprajn sonorilojn de la malnova monaĥejo — por refandi ilin al kanonoj.

Masonistoj, ĉarpentistoj, terfosistoj estis riparantaj la urban muron en Arĥangelsko; ekde mateniĝo ĝis krepusko la malnovaj turoj, kiuj staris super Dvino — la Akva, la Borda, la Gasta, — estis kovritaj de homoj. Portistoj estis levantaj supren, sur etaĝojn ŝtonon — por firmigi embrazurojn; ĉe kanonaj kaj muskedaj embrazuroj ĉarpentistoj estis metantaj anstataŭ la putrintaj novajn plankojn, instaladis kestojn por pulvo, por kuglegoj, kanonaj majstroj estis ĝustigantaj la kanonojn, por pafi per harditaj kuglegoj al ŝipoj de svedaj militistoj. Inter la turoj, kiuj estis gardantaj la urbon ĉe Dvino, oni instaladis batalajn pontojn kun ŝildoj, sur la tegmentoj de la turoj ĉarpentistoj estis konstruantaj kaĝojn, por ke la gardostarantoj malproksime vidu la riveron kaj ĉion, kio okazas sur ĝi. Sur Dvino, en ankraj haltejoj, oni metadis kaŝitajn baraĵojn, mallevadis sur la fundon grandegajn araneojn, ligitajn el traboj; dume tiuj araneoj estis markataj per specialaj buoj. Triopajn baraĵojn el traboj, metitaj dense, oni konstruis en la lokoj, kie al la malamikoj elŝipiĝo povus ŝajni oportuna. Tie, kie la baraĵoj ne estis, staris kanonoj, ruze

kaŝitaj, nevideblaj por okulo.

El la Gasta kajo fidindaj homoj, tiuj, kiuj povis teni siajn buŝojn fermitaj, kaŝe, nokte trafosis subteran pasejon al Dvino mem. De tie soldatoj povis eliri en malantaŭaĵon de svedoj tiam, kiam tiuj penos penetri en la urbon.

En malvarmaj ventaj tagoj de frua norda printempo, sub malseka neĝo, sub pluvo, sur sledo laŭ ŝvelinta Dvina glacio, rajde, piede, ĉiam kun kunmetebla mezurilo en la poŝo, rapida en moviĝoj, perdinta la voĉon pro humideco kaj malsato, aperadis Ievlev jen ĉe la skansoj en la buŝo de Dvino, jen en la Novdvina citadelo, jen en la Sepurba domo[92], kie ŝtelema kaj ruza kancelariano Gusev estis reganta konstruajn provizojn kaj monon, destinitan por la fortreso. Ĉi tien, en grandegan korton, ĉirkaŭbaritan per palisaro, oni faligadis trabojn, tabulojn, ŝtonon, brikojn, kalkon; ĉi tien oni kunpeladis homojn, ĉi tie ofte fumadis lignofajroj, sur kiuj estis kuirata likva supo por laborantoj, el ĉi tie estis skribataj paperoj al Moskvo, ĉi tien al Silvestro Petroviĉ oni venadis kun larmaj petskriboj, ĉi tie li akceptadis la pafistan regimentestron, leŭtenanton Meĥonoŝin-on, kaporalon Krikov-on, sulkiĝante, aŭskultadis iliajn vortojn, konsentadis aŭ nuligadis iliajn ordonojn.

Pro ĉiama nesufiĉa dormo la okuloj de Ievlev iĝis ruĝaj, pro neĝo, pluvoj, ventoj la vizaĝo bruniĝis. Foje, enfalinte sub glacion sur Dvino, li dum kelkaj horoj ne povis ŝanĝi la vestaĵojn al sekaj. Baldaŭ lin komencis tordi febro. Li penadis kontraŭstari la malsanon, timante ekmalsani por longe; avino Eŭdoĥa kuracadis lin per siaj pocioj, per ursgrasa ŝmiraĵo, per

92 Sepurba domo (Семиградская ратуша, Семиградская изба) — speciala kancelario, establita de Petro I, reginta la konstruadon de la citadelo. Deveno de la nomo estas malklara *(trad.)*

varmega bano — tio ne helpis. La vojevodo sendis fremdlandan kuraciston, Silvestro Petroviĉ la fremdlandajn dekoktaĵojn elverŝis — la kuracisto ne estis fidinda por li. La febro forpasis per si mem, sed komencis neelteneble dolori la kubutoj, genuoj, ŝultroj. Nokte pro la doloro per si mem el la okuloj eliĝadis larmoj. Jegorĉjo frotadis la kapitan-komodoron per vodko kun pipro, metadis fomentaĵojn. Matene iĝadis pli facile, sed la kruroj iĝis ne tro obeemaj. Silvestro Petroviĉ ordonis al Jegorĉjo eltranĉi promenbastonon, komencis iradi, apogante sin sur la bastono. Dumaano Larionov kategorie sciigis al la vojevodo:

— Ne longe, tute ne longe vivos ĉi anatemito. Kiam la somero venos — li nigriĝos, kaj ni faros sepultan diservon...

La vojevodo suspiris:

— Kiam prenos lin la Sinjoro, tiam ni ĝojos. Nun estas tro frue.

Kancelariano Gusev, ekvidinte Ievlev-on peze apogiĝi sur bastono, flustris pri tio al okupiĝantaj pri torturoj en la arestejo Abrosimov kaj Molokojedov:

— Per tri piedoj li ekiris, kvankam la aĝo ne estas maljuna. Do ĉi tie ni lin entombigos...

— Kun funebro! — hihiis Abrosimov.

— Ja ni funebros! — promesis Molokojedov.

En la Sergia, en la Nikola-Korela, en la Pertominska monaĥejoj oni transdiradis ĝoje la Arĥangelskajn novaĵojn:

— Ievlev, hunda ido, mortaĉas: la vizaĝo magriĝis, la okuloj iĝis sangaj, ne longe ni atendos...

— Kancelariano Gusev al patro ekonomo diris: en la Sepurba domo li ion faras, kaj poste subite ĝemas. Videble, la satana fajro lin bruligas, bruligas...

— Tio estas puno al li pro niaj sanktaj sonoriloj. Pro niaj larmoj, pro nia malfeliĉo, pro nia silento sensonora...

Ĉe vojevodo Aleksio Petroviĉ neniam estadis Ievlev. Ĉion li decidadis kaj faradis mem, kvazaŭ la princo eĉ ne ekzistus en la mondo. Prozorovskij silentis, timante enmiksiĝi, sed furioziĝadis kun ĉiu tago pli kaj pli. Li eĉ veturis por konsilo al ĉefepiskopo Atanazio. La maljunulo akceptis lin en plena diserva vesto, diris humile:

— Mi preĝas pro ci, vojevodo glorinda.

Kuracisto Des-Fonteines al demandoj de la princo pri forto de la sveda militistaro levadis la ŝultrojn, respondadis mallonge:

— Narvo, princo, por multaj jaroj ĉion antaŭdecidis.

La vojevodo ĝemadis:

— Ĉu oni bruligos do la urbon?

— Estas multe probable, ke la urbo estos forbruligita. Reĝo Karolo ne parolas al vento.

— Ĉu per granda forto ili venos, kiel vi pensas?

— Per malgranda forto iri ne havas sencon, princo.

— Sed jen ja kanonojn la kapitan-komodoro gisas, la fortreson konstruas, la pafistojn instruas...

Des-Fonteines silentis. Lia malhela vizaĝo esprimis nenion. La okuloj rigardis al la muro, preter la vojevodo.

— Kial vi silentas? Mi konsilon petas, sed li silentas.

Foje la kuracisto diris, ke li povus supozi la rezulton de la batalo, se li scius, kia estos la fortreso. La vojevodo maltrankviliĝis, sendis kancelarianon Molokojedov-on en la Sepurban domon, por ke venu inĝeniero Rezen kaj raportu, kia estas la fortreso. La inĝeniero venis vespere, abunde vespermanĝis ĉe la riĉa bojara tablo, poste diris, arogante montrante la dentojn:

— La fortreso estos bonega, kaj mi povas veti mian kapon, ke neniu ŝipo senpune preter la fortreso pasos al la urbo.

Prozorovskij ofendiĝis:

— Mi unuafoje aŭdas. Ĉio estas sekreta, ĉio estas kaŝa... La vojevodon mem vi ĉirkaŭiras.

La inĝeniero demandis kun stulta aspekto:

— Sed ĉu la princo ne havas kopion de desegnaĵoj de la fortreso?

Des-Fonteines diris, ke, malgraŭ maldececo, la desegnaĵojn la princo ne vidis.

— Kaj ĉu ankaŭ vi, respektinda magistro, same ne vidis?

Por momento la rigardoj de la fremdlandanoj — la bremenano inĝeniero Rezen kaj la svedo, nomanta sin dano, kuracisto Des-Fonteines — renkontiĝis. Rezen estis mokanta la svedon. Kuracisto Des-Fonteines pensis senkolere: «Ruzulo, deziras monon. Bone, la sia por la propra ne estas malamiko, mono estos. Por komenco ni donos pli multe, ne avaros».

La vojevodon kun Rezen la kuracisto ne sen peno pacigis, la festeno daŭris longe, oni drinkis tre multe, la inĝeniero

rimarkeble ebriiĝis. Poste li per ebria voĉo proponis al la vojevodo fari grandan honoron — viziti la citadelon. Akompanante la inĝenieron al la sledo, la kuracisto diris germane, ke bonaj servoj estas bone rekompencataj.

— De kiu? — demandis Rezen.

La kuracisto klarigis, ke *Herr* Ievlev vane estas tiel malamika kun la vojevodo, kun kiu necesas havi bonajn rilatojn. La princo estas influhava persono en la ŝtato, li estis siatempe vojevodo en Azovo, ĝuste tiutempe, kiam la pafistoj tie ribeliĝis. La pafistoj estis la plej malbonaj malamikoj de la Siro. Ne indas forgesi, ke la ribelantoj postulis eldoni al ekzekuto du personojn, nur du: la nun forpasintan glorindan admiralon sinjoron Franciskon Lefort-on kaj la princon-vojevodon Prozorovskij-on. La Siro multe ŝuldas al Prozorovskij kaj elkore respektas lin, dum la princo ĉi tie ne havas eĉ la planon de la fortreso.

Rezen montris la fortikajn dentojn, balancis la kapon, konsentante, sed subite demandis:

— Ĉu vi longe loĝis en Svedio? Vi havas svedan prononcon.

Des-Fonteines pro neatenditeco konfuziĝis.

La nokton li pasigis maltrankvile, sen dormo.

En la sekva tago Rezen mem alveturis por la vojevodo, sed la kuraciston al la konstruado de la fortreso li ne invitis. Des-Fonteines ne diris eĉ vorton, sed la vojevodo kriis. La inĝeniero respondis al li seke:

— Mi, princo, nur plenumas la ordonon de sinjoro kapitan-komodoro. Li estas por mi estro, mi estas por li subulo. Li

diris: en la fortreson veturos nur unu, kaj neniu krome, — vojevodo princo Prozorovskij. Kio koncernas sinjoron kuraciston Des-Fonteines-on, do li atendos sinjoron vojevodon en la domo en Arĥangelsko. Jen ĉio. Kaj neniel alie.

La vojevodo deziris krii al Rezen plu, sed ekvidinte lian malmildan, firman rigardon, la kunpremitajn lipojn, kraĉis kaj eksidis en la kaleŝon. Des-Fonteines kurbiginte la dorson revenis en la vojevodan palacon. Lia afero estis malbona — li komprenis tion. La rusoj ion sciis pri li, sed kion? Kaj de kiu? Ĉu li estas ne sufiĉe singarda?

La tago estis venta, malvarma, kun oblikve fluganta malseka neĝo. Korpulenta, grandventra, en alta gorĝpelta ĉapo, en peza peltmantelo, la vojevodo kun peno grimpis sur monton da brikoj, tuj ŝvitiĝis, apenaŭ sukcesante sekvi la rapidkruran kaj malpezan inĝenieron. Jen al li ŝajnis, ke ili turniĝas sur unu loko, jen ke tiun ĉi muron li vidis de alia flanko, jen ke la fortreso estas tro granda, jen ĝi ŝajnis tro malgranda. Ĉie kun tondro frapadis marteloj de ŝtontajlistoj, pezaj, sur ĉenoj, ŝtipbatiloj enbatadis fostojn; neatendite ĉe la orelo mem de la princo bojis kanono; kiam li turniĝis, al li ŝajnis, ke la kanonistoj ridas.

— Ili elprovas! — klarigis serioze Rezen. — Ĉi tie estas tiel ĉiam. Estas tre malfacile fari ĝustajn kalkulojn, kaj tial hieraŭ al unu ĉarpentisto estis bruligita la vizaĝo...

Ili iradis longe. Ŝvito de la vojevodo verŝiĝis rivere, ju pli multe li rigardadis, des malpli multe komprenadis. Rezen klarigadis nekompreneble, maltrafe enmetadis fremdajn vortojn, turniĝadis sur unu loko, subite kaptadis la princon je la maniko kaj trenadis post si, subite okazadis tiel, ke ili bezonas

rampi sub traboj, kiuj tuj povas fali. En krepusko ree pafis kanono; de la muro, tondrante, batiĝante al la skafaldo, falis tino kun argilo.

— Falu vi ĉiuj al la diablo! — diris la princo. — Mortigos vi min ĉi tie. Konduku min al la barko, Dvinon mi transveturos, eksidos en la kaleŝon...

Nenion kompreninte, la vojevodo revenis hejmen, trinkis kvason kaj kuŝiĝis dormi. Matene al la vojevodo subite venis Ievlev kun spado, en gantoj, kun tri razmuzelaj soldatoj. Aleksio Petroviĉ ree senkuraĝiĝis, — ĉu estas ordono de Romodanovskij, ĉu oni eksciis ion malbonan en Moskvo; la globokululo ja povas, hodiaŭ vi al li estas la unua amiko, sed se li ekscias pri vi ion ne necesan — tuj en la Preobraĵenskan kancelarion: torturi!

Enirinte, Ievlev longe silentis, la soldatoj staris kiel ŝtonaj statuoj. Finfine, kiam la vojevodon kaptis tremo, Ievlev ekparolis — deklaris, por kio li venis: la kuracisto de dana deveno, aŭ ŝajniganta sin dano magistro Lars Des-Fonteines devas ne pli malfrue, ol en la hodiaŭa vespero, forveturi al si eksterlanden.

— Ĉu vi, patro mia, freneziĝis? — kuraĝiĝante, demandis la vojevodo. — Ĉu vi ne scias, ke ĉi glora kaj klera kuracisto kun la cara militistaro al Azovo iradis, ĉe Narvo niajn militistojn kripligitajn per sia arto kuracadis, kun mi estis en la pasinta vojevodeco, dum multaj jaroj bonege sian laboron en Arĥangelsko plenumas...

Ievlev silentis, rekte rigardante en la vizaĝon de la vojevodo per siaj bluaj, glaciaj okuloj.

— Tro kuraĝa vi, amiko, iĝis! — skuante la grasajn vangojn, alpaŝante al Silvestro Petroviĉ, diris la vojevodo. — Ne laŭdos oni pro tio en Moskvo. Mi, sinjoro mia, estas ne simpla homo, de la patroj ni...

— Per patraj ostoj komerci estas granda peko! — interrompis la vojevodon Ievlev. — Kaj pri vi, princo, mi tro multe ĉi tie aŭdis. Sed hodiaŭ ne pri tio temas, ne por tio mi kun soldatoj al vi venis. La fremdlanda kuracisto, havanta lokon de loĝado en via domo, princo, estas rimarkita de ni en agoj, kiuj ne povas esti traktataj alie, ol kiel servo al la malamiko — tio estas al la sveda flanko. Por kio via kuracisto bezonas scii la planon de la fortreso Novdvina? Por kio tiuj liaj fiaj streboj trovas subtenon en viaj agoj, sinjoro vojevodo? Informisto, kaŝita sendito, sekreta spiono — jen kiu estas via magistro, kaj mi per mia potenco, donita al mi de la Siro, ordonis sendi lin for, sed vi, princo-vojevodo, perdinte konsciencon, lin defendas. Se vi ne eldonos la kuraciston libervole, mi emos supozi, ke ankaŭ vi al li helpas, ĉu intence aŭ pro stulteco, — pri tio oni en Moskvo ekscios...

La vojevodo konfuziĝis, ekbalbutis sensencaĵon, minacis per la Siro. Ievlev lasis al li paroli sufiĉe kaj ankoraŭ timigis — pli forte. La princo palpebrumis, snufis, pensis iom, suspiris; levinte la ŝultrojn, konsentis, ke, eble, li ne sufiĉe konis sian kuraciston.

— Tiele estas pli bone! — severe finis la konversacion Ievlev.

En la korto jam staris jungaĵo de sataj doganejaj ĉevaloj. Kaporalo Krikov en la ĉambro de la kuracisto estis silente rigardanta, kiel tiu prepariĝas. Des-Fonteines, penante konservi

trankvilon, estis metanta en vojaĝan kofron latinajn librojn, monon, ĥirurgiajn instrumentojn. Samloken, garde ĉirkaŭvolvinte per ĉifono, li metis ĉizitan el eburo figureton, — Krikov ekvidis nur la supron de la gorĝpelta ĉapo kaj tuj rekonis sian laborajon, malaperintan en pasintaj jaroj, kiam laŭ la ordono de kolonelo Snivin la rajdistoj enrompiĝis en lian loĝejon.

— Montru! — trankvile diris li.

La kuracisto etendis la figureton. Krikov metis ĝin sur la polmon, — jen kiam ĝi troviĝis, la maljuna vojevodo kun ventrego, koruptulo kaj maljusta juĝisto, mallarĝiginta la porkajn, grasiĝintajn okuletojn, elmetinta antaŭen la dikan kruron.

— Ĉi ajo estas ŝtelita disde mi! — diris Atanazio Petroviĉ.

— Sed ĝin al mi donacis sinjoro kolonelo Snivin! — diris la kuracisto.

— Ĝuste li estas la ŝtelinto! — respondis Krikov.

Des-Fonteines levis la ŝultrojn. Krikov metis la figureton en la brustan poŝon, fermis la butonon de la kaftano. Lia vizaĝo estis morna: se tiu forveturigos la «vojevodon», tiu mokos ĝin, diros — jen kiaj ili estas, la moskvianoj. Ne vi, spiono, niajn malfeliĉojn moku. Ni mem, kiam venos horo, solvos...

Kurbe ridetante, Des-Fonteines kun la skatolo en la mano eliris en la korton. Tri doganaj soldatoj estis donitaj al li por akompano ĝis Somera Zolotica. Tie solovkiaj prizonaj monaĥoj devis liveri la fremdlandanon ĝis la limo: Silvestro Petroviĉ skribis al ili leteron.

Des-Fonteines eksidis en la sledon, kovriĝis per ursa felo.

Krikov rajde akompanis la sledon ĝis la bariero, svingis al amikoj-doganistoj la manon en ganto, ekrajdis reen al la Sepurba domo — raporti al Ievlev, ke la spiono estis elveturigita.

Silvestro Petroviĉ ordonis al Krikov atendi. Jegorĉjo ien haste forkuris, gaje kaj mistere palpebruminte al Atanazio Petroviĉ. En la ĉambron al la kapitan-komodoro, knarante per la altbotoj, retenante ĉe la femuro la spadon, per rapidaj paŝoj trairis la pafista regimentestro, poste, en varma mantelo, leŭtenanto Meĥonoŝin, ankoraŭ du oficiroj — pafistaj centestroj Merkurov kaj Ĵivotovskij, ambaŭ solenaj, kun sabroj. Paŝis sur sia lignaĵo, fumante pipon, ferdekestro Semisadov.

Atanazio Petroviĉ plu atendis, amare pensante: «Sed ke mi atendas, neniu zorgas. Mi estas kaporalo. Ne kompareblas mia mizereco kun tiuj grandsinjoroj. Ne gravas, ke mi estas grizhara, ke pro falsa akuzo mi estis malglorita, kiun tio interesas!»

Subite aperis iam malaperinta Forĝisto — rigora, severa, magra. Atanazio Petroviĉ subridis senkolere, diris al Teodozo Forĝisto:

— Kaj la Butersemajno jam antaŭlonge pasis! Ĉu vi plu vivas? Kie estas via lasta juĝo? Ĉu vi atendas?

— Nun ne atendas, sufiĉas...

Li eksidis apud Krikov, elprenis el la sako panpinton, komencis maĉi.

— Kion do vi nun faros? — demandis Krikov.

— Ni vidos. Eble, kanonojn gisos, se necesas. Ĝis la tempo.

— Kaj poste?

— Kaj poste mi trovos, kiu pri ĉio kulpas.

— Kiel do?

— Jen tiel. Mi trovos kaj punos. Laŭ justo mi vivos...

Li finmanĝis sian panpecon, elŝutis la panerojn en la buŝon, nodis la sakon per basto. Finfine ankaŭ lin oni vokis al Silvestro Petroviĉ. Li estis ĉe la kapitan-komodoro nelonge, eliris gajiĝinta, diris, ke li iras al la Kanona korto. Post Forĝisto al Silvestro Petroviĉ iris kancelariano kun plumo sur la orelo, kun abako, poste amase — metiistoj, post ili la inĝeniero el la citadelo — Rezen. Krikov plu ne estis vokata. Ĉe krepusko, perdinte paciencon, li eniris sen voko. Ievlev ordonis atendi plu.

Kiam oni bruligis la kandelojn, revenis anhelanta Jegorĉjo, alportis longan, kovritan per ĉifono volvaĵon.

— Ĉu longe mi ankoraŭ atendu ĉi tie kiel fosto? — kun kolero demandis Krikov.

— Ja se mi ĝin nenie povis trovi! — kulpe respondis Jegorĉjo. — Al ĉiuj majstroj mi kuradis, la piedojn batis...

— Kion trovi?

Jegorĉjo montris la volvaĵon, forsvingis, foriris. Kaj nur kiam oni eksonoris vespron, Jegorĉjo aperis en la pordo, proklamis kun soleneco:

— Atanazion Petroviĉ-on Krikov-on petas veni al li la kapitan-komodoro!

Krikov eniris, ĉirkaŭrigardis. La pafista regimentestro, centestroj Merkurov kaj Ĵivotovskij, leŭtenanto Meĥonoŝin,

Semisadov, Jegorĉjo, aliaj oficiroj — ĉiuj estis ĉi tie. Hele brulis kandeloj en kandelingoj, po kvin kandeloj en ĉiu, la vizaĝo de Ievlev estis severa, pala.

— Ĉiuj staru! — diris li per akra voĉo kaj malvolvis paperon, de kiu pendis granda, sur ŝnuretoj sigelo. — Per ukazo de lia cara moŝto Siro Petro Aleksejeviĉ...

Krikov aŭskultis, ne komprenante. Poste li komprenis. Ievlev iris al li tra la tuta ĉambro, tenante sur la etenditaj manoj spadon kun orumita tenilo, kun portepeo kaj portrimeno. La oficiroj staris senmove, turninte la kapojn maldekstren, sur la grasa vango de la pafista regimentestro rampis larmo. Merkurov spiris plenbruste, ofte. Semisadov aspektis kuraĝe, sed sur liaj razitaj vangoj ludis makzelmuskoloj.

— Kisu la spadon, sinjoro kapitano Krikov! — diris Ievlev, starante kontraŭ Atanazio Petroviĉ. — Mi esperas pri tio, ke la pikilo de ĉi bonega ŝtalo en ne malproksimaj tempoj, estante en viaj manoj, donos al ni cirkonstancojn, necesajn por promocio de vi el kapitano al majoro.

Atanazio Petroviĉ ekstaris sur unu genuon. Ievlev etendis al li la spadon, li prenis ĝin sur la polmojn de siaj grandaj fortaj manoj, kisis la tenilon, leviĝis. Silvestro Petroviĉ brakumis lin, viŝis per sia tuko la vilan, malsekan pro larmoj vizaĝon. La oficiroj kungregiĝis, karespremadis, brakumadis Krikov-on, frapadis lin al la larĝaj ŝultroj; li ridetadis perplekse, aŭskultis la vortojn de Ievlev:

— Kaj ĉio tio ne estis. Forgesu, karulo. Nu, ni iru, Taisja Antipovna la tablon primetis, por festi. Ni drinkos iomete je la sano de kapitano Krikov Atanazio Petroviĉ...

5. En torturejo

Dorminte post tagmanĝo, vojevodo princo Aleksio Petroviĉ, akompanata de dumaano Ivano Simoneviĉ Larionov kaj kancelarianoj Abrosimov, Molokojedov kaj Gusev, iris aŭskulti, kion parolas sub torturo la kaptitaj latronoj Gridnev kaj Vataĵnikov. La dumaano, helpante al la bojaro malleviĝi de la perono de la vojevoda palaco, diris konfide:

— Unu el ili certe vidis per la propraj okuloj tiun veninton Azovan, kiu kontraŭ vin, princo, la popolon ribeligas. Lancistoj, latronoj, murdistoj. Gardu vin, princo-vojevodo, gardu; ni gardas vin samkiel la patron-caron, sed ĉu ni povas ĉion kontroli? Trans ĉiu angulo oni povas embuski...

Ŝmacante sur flakoj en la korto, la princo timeme rigardis ĉirkaŭen, nun li entute ne forlasadis la loĝejon. Ĉe la sledo staris akompanantaj gardistoj kun halebardoj, kun sabroj, kun klaboj — por bati maliculojn, se ili atakos la trajnon de la vojevodo.

En riĉa peltmantelo el dorsoj de ruĝ-nigraj vulpoj, en gorĝpelta ĉapo kun perloj, la bojaro traveturis per la sledo ĝis firma kverka barilo, kiu estis ĉirkaŭanta enfositan en la teron, malheliĝintan pro tempo domon, malleviĝis laŭ ŝtupoj malsupren kaj eksidis sur benkon, anhelante kaj viŝante la vizaĝon per tuko. Torturisto Pozdjunin estis rapide finmanĝanta en malhela angulo fastan manĝaĵon — premitajn pizojn kun oleo kaj frititajn cepajn pirogojn. La latronon oni estis rekonsciigantaj per akvo kun neĝo, — necesis atendi.

— Kvason alportu! — ordonis Aleksio Petroviĉ. — Pro

salaĵo mi trinki deziras.

Oni alportis kvason, la princo trinkis, komencis turni la fingrojn sur la ventro — enuis. Kancelariano Molokojedov, elstariginte antaŭen la barbeton, flustris pri Ievlev, kiom fia li estas homo. El fidindaj buŝoj estas sciate: en preĝejoj oni lin ne vidis, nun estas fasto, kaj li, damnita, ne fastas. Kancelariano Abrosimov kapjesadis.

Finfine Gridnev ekĝemis, oni lin ankoraŭ foje priverŝis per glacia akvo, torturisto Pozdjunin viŝis la manojn per viŝtuko, tiris kanabajn ŝnurojn, glatumis ŝeklon, por ke ĉio estu en ordo, por ne senhonoriĝi antaŭ la bojaro. Kancelariano Molokojedov per kentorĉo bruligis kandelojn en alia kandelingo, akrigis plumon, malvolvis paperan volvaĵon — skribi.

— Nu, faru, faru! — ordonis dumaano Larionov al la torturisto. — Moviĝu pli vigle...

Du senteraj kampuloj, kiuj loĝis ĉe la prizona domo, alportis Eŭtimion. Stari li ne povis — ili sidigis lin sub la pendigilo. Pozdjunin metis liajn manojn en la ŝeklon, ligis per maŝo, ĵetis demandan rigardon al dumaano Larionov. Tiu, dismetante siajn blondajn lipharojn sur la vangojn, apogis la kubutojn sur la tablo, prepariĝis aŭskulti. La ŝnuro stride knaris. Sur la rozkolora haŭto de Gridnev videbliĝis la ripoj, la korpo iĝis longa, kvazaŭ ne vivanta. Pozdjunin per la dekstra mano prenis knuton, plektitan el tatara lonicero, prepariĝis al bato.

— Vi faru pli facile! — ordonis la dumaano. — Batu, sed sen tiro!

Kaj, turniĝinte al Prozorovskij, klarigis:

— Bona estas nia torturisto, pli bonan ne eblas trovi, sed nur

li tro forte batas. Kaj se kun tiro — tiam atendu dum ne malpli ol horo, kiam oni rekonsciigos per akvo...

La ŝnuro plu knaradis. Gridnev tute ekpendis, en la silento aŭdeblis lia fajfanta spirado. La dumaano, plu dismetante sur la vangojn la lipharojn, demandis:

— Nu, oĉjo, ĉu vi diros honeste?

Gridnev respondis tuj, per trankvila voĉo, kvazaŭ estus sidanta sur benko:

— Vi konu vian oĉjon torturiston Joĉjon, caran knuton kaj ekzekutan ŝtipon. Mi por vi, hundo, ne estas oĉjo.

— Batu! — ordonis la dumaano.

Pozdjunin turnis la manon kun la knuto, tordiĝis, kriis, kiel krias ĉiuj knutbatantoj:

— Gardu vin, mi vipos!

La knuto mallonge fajfis en la aero, sur la korpo de Gridnev pasis spasmo, Larionov konsilis:

— Vidu, la mano estas peza. Mi diris — pli facile!

— Kiel oni min instruis, — diris Joĉjo Pozdjunin. — De la junaj jaroj mi laboras, ne novulo, ŝajne...

— Ne parolu!

El la brusto de Gridnev eliĝis stertoro, li ekbalbutis komence malklare, poste ĉiam pli laŭte, terure:

— Ĉiuj vi estas latronoj, la vojevodon sur lancojn, liajn infanojn sub hakilon, malamikoj, murdistoj, serpentoj, aspidoj...

Prozorovskij, flaviĝinte per la vizaĝo, ŝoviĝis antaŭen,

aŭskultis; Pozdjunin rigidiĝis kun la levita knuto; dumaano Larionov kapjesadis, kvazaŭ konsentante kun tio, kion estis diranta Eŭtimio; kancelariano Molokojedov, elŝovinte la langon pro penemo, estis rapide skribanta la torturan folion. Gridnev kriis sufokiĝante, pendante en la ŝeklo sur la eltorditaj brakoj, perdante la konscion:

— Ni bruligos vin, latronojn, la kapojn forhakos, la infanojn viajn en Dvinon, en Dvinon, en Dvinon...

— Mallevu! — ordonis Molokojedov.

La senteruloj gardeme akceptis sur la manojn la senkonscian korpon, portis sur bastomaton. Pozdjunin iris en sian angulon por fini la tagmanĝon. Prozorovskij estis riproĉe balancanta la kapon. Gusev diris:

— Dum li reviviĝas — la alian ni torturu.

Oni alkondukis Vataĵnikov-on. Li, ne riverencinte, ĵetis rigardon al la bojaro, subridis, demetis la kaftanon, la ĉemizon, turnis al la vojevodo la dorson en koaguliĝintaj sangantaj stigmatoj.

— Ni vin bruligos hodiaŭ, kanajlon! — minacis Molokojedov. — Vi alie parolos!

La senteruloj alportis fajron en fera bovlo. Ree ekknaris la ŝnuro, la bronzkolora, pometvanga vizaĝo de Vataĵnikov blankiĝis, li silentis. La senteruloj ekklopodis apud la braĝo, ĵetis sekan baston, lignerojn. La vizaĝo de Vataĵnikov misformiĝis, estis aŭdeble, kiel li grincis per la dentoj.

— Parolu! — kriis Molokojedov.

— Mi silentas... — ne tuj eldiris Vataĵnikov.

— Batu! — malpeze leviĝante de sia loko, ordonis Prozorovskij. — Batu, torturisto!

Pozdjunin ekhastis, deiris je du paŝoj, nelaŭte avertis:

— He, mi vipos!

— Dufoje! — kriis Larionov.

La knuto ree fajfis.

— Ĉu la trian? — demandis Joĉjo.

— Ĉu li spiras?

— Ŝajne, ne.

— Mallevu! Kaj pli gardeme, por la verton ne bati...

Dum Vataĵnikov estis rekonsciigata per akvo, oni ree levis Gridnev-on. Pro la fajro li komencis paroli rapide, nedistingeble, unue mallaŭte, poste ĉiam pli laŭte. La flamo en la bovlo brulis hele, nigra fumo estis foriranta en la fumfenestron. Prozorovskij glutadis kvason, la kancelarianoj skribadis, la dumaano komandadis.

— Niaj, bonaj ĉie estas, — raŭkis Gridnev, — laborantoj estas por ni, en la konstruejoj multaj estas por ni, kiuj pro malsato mortas, ŝvelas, skorbutas. Pafistoj, dragonoj — al ni venos. Panistoj en la urbo, kvasistoj, kupristoj, koĉeroj, fiŝistoj...

— Nomojn diru! — kriis Larionov.

Eŭtimio ne aŭdis.

— Muskedojn ni havos, — flustris li, — pistolojn, kanonojn havos, finos ni vin, monstrojn...

Lin oni ree demetis. En la torturejo iĝis varmege, la bojaro

demetis la peltmantelon, la torturisto — la ĉemizon. Molokojedov klarigis al la vojevodo, ke ĉio estas farata laŭ la leĝo. En la leĝo estas dirite torturi ĝis tri fojoj, tamen se la latrono en la dua aŭ tria torturo siajn parolojn ŝanĝas, tiam ankoraŭ tri fojojn eblas fari. Se en la sesa torturo li la antaŭan negos — ankoraŭ eblas torturi. Ekde la deka torturo, laŭ la leĝo, oni per brulanta verga fasko al la dorso la latronon batas. Tio estas bona torturo, malmultaj ĝin eltenas.

— Nun do kioman vi faras? — demandis la vojevodo.

— Ja naŭan.

— Ĉu la parolojn ili ŝanĝis?

— Antaŭe ili silentis, princo, kaj nun minacas.

— Batu per la faskoj!

La kancelarianoj interrigardis, sendis unu senterulon bruligi vergojn. En la malfermita fenestreto aŭdiĝis tintado de la malgranda sonorilo, — ĉiujn ceterajn en la urbo demetis Ievlev. Aleksio Petroviĉ larĝe krucosignis sin, la kancelarianoj faris krucosignojn malpli larĝajn. Torturisto Pozdjunin ne kuraĝis entute: ne pri tia li okupiĝis afero, ke li sin krucosignu.

Kiam oni ree kondukis Vataĵnikov-on, Larionov diris prudente:

— Parolu prefere ne sur la pendigilo. Parolu bonvole. Pentu pri ĉiuj kulpoj, nomu la komplicojn. Tiele estas ne laŭ Dio, — per nigraj vortoj insulti kaj minaci. Parolu ĉi tie, en trankvilo, kun racio. Mem juĝu, homo: la vizaĝo ŝvelis, sango tra la haŭto iras, la okuloj ne vidas, la piedoj estas forbruligitaj, vi povas baldaŭ vian vivon fini sen pekkonfeso. Por via faciligo mi demandos, kaj vi respondu racie...

— Demandu! — raŭke respondis Vataĵnikov.

— Mi demandas: por kio vi malican aferon entreprenis, se vi scias, ke la sveda militistaro iras nian teron konkeri?

Vataĵnikov pensis iom, glutis aeron, diris klare:

— Tio estas afero ne malica, tio estas afero bona, kiun ni entreprenis. Kaj al la sveda militistaro ni ne estas helpantoj. Kaj lin, bojaron, kaj idojn liajn, kaj juĝistojn maljustajn, kaj koruptulojn kancelarianojn, kaj vin, dumaano, kaj ĉiujn, pri kiuj en la enketado estis dirite, — ni finos! Kiam, vi ne ekscios kaj neniam scios. Ĉe tio mi staras kaj neniajn vortojn de mi vi plu aŭdos!

— Parolu, kiu preteriranto de Azovo ĉi tie estis, kiu sciigon pri la pafista ribelo alportis kaj vin kontraŭ la vojevodo levadis? Parolu, kien li iras? Parolu, kiu ankoraŭ liajn ribeligajn vortojn aŭskultis?

— Mi silentas! — kun sovaĝe ekbrilintaj okuloj, raŭke diris Vataĵnikov.

— Bruligu! — rozkoloriĝante per la vizaĝo, alte kriis la dumaano.

Vataĵnikov-on oni ree levis, torturisto Pozdjunin elŝiris de la senterulo la brulantan faskon, vigle saltis sur la piedan trabon, tiris la ŝnuron kun la ŝeklo, sed tuj haltis.

— Kial vi ne bruligas, hunda ido! — kriis Prozorovskij.

— Finiĝis li! — per alta voĉo respondis Pozdjunin. — Malĝuste ni faris. Tro multe por unu tago. Ne eltenis li.

La kancelarianoj donis al la princo la peltmantelon, la gorĝpeltan ĉapon; krucosignante sin antaŭ la malviva korpo, ili

ekiris al la pordo. Eŭtimio Gridnev estis stertoranta sur la bastomato en la angulo...

— Nun estos malbone! — timigante la bojaron kaj ektimante jam mem, diris la dumaano. — Li, la mortinto, la sola tiun preterpasanton Azovan vidis. Nun, mi timas, ne trovos ni la iniciatanton de la ribelo...

— Prenu ĉiujn, kiuj estas suspektataj! — ordonis la vojevodo. — Torturitojn konduku tra la urbo katenitaj por almozo, por ke la metiistoj per la okuloj vidu, kion ni faras kun maliculoj. Kaj tenu min sub la kubutoj, mi glitstumblos ĉi tie...

6. Bona kaj malbona

Dum en la ĉambro de Silvestro Petroviĉ ili estis fumantaj pipojn kun forta tabako, li duonŝerce, duonserioze rememorigis al la oficiroj malnovan bonan edifon: «Ve al ofendinto de vidvino, prefere li sian domon bruligu, ol pro amara suspiro de la vidvino li mem brulu en la Geheno». Poste li rakontis al nesciantoj, kia homo estis rudristo Rjabov. La pafistaj centestroj aŭskultis atente.

— Feliĉa kombinaĵo! — parolis Ievlev, elspirante dolĉan pipan fumon. — Menso akra, gaja koro sen rankoro, kapablo al lerno de sciencoj mirinda. En tiuj malproksimaj jaroj, kiam mi estis ĉi tie la unuan fojon, la estonteco de la floto rusia malkovriĝis al Petro Aleksejeviĉ kaj ni, kiuj estis kun li, ne tiam, kiam ni ekvidis la ŝipojn kaj la maron, sed tiam, kiam ni ekkonis la homojn, similajn al la pereinta rudristo...

Leŭtenanto Meĥonoŝin, duonkuŝante sur larĝa benko, tiris sin, prononcis kun oscedo:

— Ĉu tiel, sinjoro kapitan-komodoro? Tre mi pri tio dubas. Mia pronuncio estos alia: fremdlandaj ŝipistoj — jen kiu vere inspiris la Siron pri maraj artoj. La forestieroj — niaj fremdlandaj vizitantoj — estas la veraj instruistoj niaj. Mi tiel aŭdis...

— Vi aŭdis, leŭtenanto, sed mi vidis! — abrupte diris Silvestro Petroviĉ kaj leviĝis. — Kaj al vi mi tutkore konsilas: kion vi ne scias bone — ne babilu. Kaj kio estas tiu «pronuncio»? Ĉu vi ne povas elparoli «eldiro»? «Forestieroj»? Kiam vi ĉi doktecon akiris, kiam sukcesis?

— Estante eksterlande...

— En kiu do ekstera lando? — demandis Ievlev. — Vi ja, fraĉjo, estas Muroma nobelo, trans la maro ne estis, — vilaĝon Kukujon vi vidis, eble, sed ĝi ankoraŭ ne estas eksterlando...

Meĥonoŝin kunmetis la lipojn, ruĝo ĵetiĝis al lia vizaĝo.

— Prepariĝante al fora vojaĝo...

— Repariĝo ankoraŭ ne estas vojaĝo! — tute kolere diris Ievlev. — Jen, kia lertulo. Jam hieraŭ mi intencis diri al vi, sed forgesis pro tempomanko: por kio vi ne estas en uniformo? Ĉu vi estas transmara bonvivanto? Vi estas dragono, sed kamizolo sur vi brokaĵa por kio estas? Per pinglo kun gemo vi pavas — por kio? Ĉu puntoj estas militista afero? Pli bone ol gemoj oficiron ornamas glora uniformo, memoru!

La leŭtenanto ofendiĝis, Ievlev frapis lin al la ŝultro, diris, kvazaŭ repaciĝante:

— Ne gravas, ĉio ĉi estas pro juneco. Tio pasos kun jaroj. Ni iru al la tablo!

Taisja renkontis la gastojn per profunda riverenco, laŭ malnova moro petis ne abomeni kalikon el ŝiaj manoj. Apude, en lazura ĉemizeto, brodita per akvostrioj, skvamoj kaj herboj, zonita per pimpa zoneto el tafto, staris kun serena rideto knabo, tenis sur la etenditaj manoj pladon kun raspita kun acidkremo rafano — por la unua, postvoja manĝeto. La gastoj, amasiĝante en la pordo, paŝbruante per altbotoj, trinkadis el la kaliko, kisadis la belan mastrinon al la delikate rozkoloraj vangoj, manĝetadis la rafanon el la manoj de la knabo. Li rigardis gaje, liaj okuloj — verdaj kun varmegaj fajreroj — kvazaŭ spiris per regalema afableco.

Per la festeno la fiŝista avino Eŭdoĥa mirigis ĉiujn. Ĉio estis dismetita sur blanka brodita tablotuko, inter boteletoj, boteloj kaj kruĉoj, pruntepreniteĵ por tia okazo de la edzino de la pafista regimentestro: kaj pirogoj kun sturga ĥordo, kaj pirogetoj kun haketitaj ovoj kaj fungoj, kaj rulaĵo kun piprita ŝafaĵo, kaj tranĉita ruĝa brasiko kun cepo, kaj leporo en vino, kiu estas surtabligata post tagnokta stufado en malgrandaj, sigelitaj per argilo potetoj...

Por la kvara pladŝanĝo la avino kaj Taisja surtabligis en tukoj frajajn blinojn, tiujn, kiuj estas bakataj el frostigita frajo kun grio. Ĉe la blinoj la gastoj intermiksiĝis: la pafista regimentestro ekdisputis kun majstro Koĉnev, Ivano Kononoviĉ depuŝis oficiron Meĥonoŝin-on, alsidiĝis al Krikov. Merkurov, la pafista centestro, komencis kun Semisadov duope longan fiŝistan kanton. Leŭtenanto Meĥonoŝin, ebriiĝinte, ekfanfaronis pri sia nobeleco, pri la hereda bieno, minacis, ke li ankoraŭ iomete servos, kaj poste iros al gloraj transmaraj landoj — homojn rigardi kaj sin montri. Svingante la manojn,

kroĉante per la maniko jen salujon, jen bovlon, li rakontadis, kiajn agojn li faros, por ke estu al li direktita atento de la patro-Siro. Kaj jam nun, diradis Meĥonoŝin, lin ofte vokas al si neniu alia, ol la princo-vojevodo, konsiliĝas kun li kaj, eble, intencas edzigi al unu el la princidinoj. Maljunaj fraŭlinoj ne estas frandaĵoj, plezuron de tia galantaĵo oni ne povas atendi, sed ne eblas ja ofendi la princon Prozorovskij-on mem. Edziĝinte al la princidino, li iros al malproksimaj transmaraj teroj, aĉetos tie por si *château* — palacon kaj vivos por sia plezuro, ne tiel, kiel ĉi tie — kie eĉ traktadon decan ne eblas atendi, nur sola sovaĝeco kaj malĝentileco...

La gastoj aŭskultadis, interrigardadis, interridadis. Li nenion rimarkadis. Ievlev ekrigardis al li unu fojon, alian, poste interrompis lin, ordonis iri hejmen — dormi. Meĥonoŝin grimacis.

— Iru, frato, iru! — diris Silvestro Petroviĉ. — Tempas, amiko. Jen, vi tro krias. Kaj ne taŭgas por vi, leŭtenanto, malglori kaj malhonorigi patrinon-Rusujon. Ĉiu vorto estas insulto. Sed vi de ĝi nutriĝas, de la hereda bieno monon atendas. Iru, satdormu, eble vi iĝos pli saĝa!

Meĥonoŝin leviĝis; malfirme paŝante, ekiris al la pordo, kaj estis aŭdeble, kiel li insultis en la vestiblo. Silvestro Petroviĉ balancis la kapon; kliniĝinte al Simono Borisoviĉ, diris riproĉe, ke tro multe da libero oni donis al la leŭtenanto, kun tia ni ankoraŭ suferos...

Poste venis kun gratuloj tri malnovaj amikoj — dogansoldatoj Sergunkov, Aleksio kaj Prokopjev Eŭdokimo, la ĥolmogora majstro, eburtajlisto kaj kantanto. Dum tago Prokopjev tajlis al la kapitano por la spada tenilo vangojn el

malnova osto. La vangoj rondiris por rigardi, sur ili Eŭdokimo kun granda kaj subtila arto montris ŝipojn, maron kaj leviĝantan sunon. Ĉiuj laŭdis la lertulon. Eŭdokimo diris modeste:

— Mi ja ne estas la plej bona, prefere sinjoro kapitano mem montru siajn faraĵojn. Mi al li ne egalas en tiu arto...

Silvestro Petroviĉ kun miro ekrigardis al Krikov, Taisja malfermis kofron, elmetis sur stanan teleron fiŝiston en maro, tajlitan el rosmara dentego. La fiŝisto-rudristo estis staranta ĉe postremilo, vento taŭzis al li la harojn, la fiŝisto rigardis for, al malbonvetero, atendis baton de kolera furiozanta naturo.

— Paĉjo mia! — diris en la eksilentinta ĉambro Ivaĉjo.

— Via, infaneto! — mallaŭte respondis Ievlev, glatumante la molajn buklajn harojn de la knabo.

Taisja rigardis al la fiŝisto silente, trankvile. Sed ie en profundo de ŝiaj okuloj Ievlev ekvidis subite tian fieron, ke lia koro ekbatis pli ofte. Li komprenis: ankaŭ ĝis nun ŝi estas feliĉa pro tio, ke ŝin amis Rjabov, ankaŭ ĝis nun ŝi fieras pri li, ankaŭ ĝis nun ŝi fidelas ne al lia memoro, sed al li mem.

En malfrua nokto, kiam ili drinkis la lastan glaseton je longa kaj glora vivo de kapitano Krikov, kun ŝriko malfermiĝis la pordego, en la korton enveturis stebita per lupa pelto sledkaleŝo por longa vojo, ties koĉero malfermis la pordon, kriis:

— He, kiu loĝas, eliru renkonti gastojn...

Ievlev eliris, apogante sin sur la bastono, fiksrigardante en noktan mallumon. El la sledkaleŝo la koĉero kun peno elprenis unu volvaĵon, poste alian. La senfine kara voĉo petis:

— Pli garde, oĉjo, ne veku ilin...

Silvestro Petroviĉ oĥis, kuris malsupren, brakumis Manjon, perdinte la bastonon, ekportis la infanojn en la domon. Atanazio Petroviĉ en malbutonita kaftano estis lumanta sur la sojlo de la vestiblo, ronkadis la ĉevaloj, ekploris, subite ektiminte la tumulton, la pli juna filino de Ievlev — Venjo. Manjo, surgenuiĝinte, estis malvolvanta sur la pli aĝa filino feltajn kovrilojn, la pli junan, plorantan, kun rido estis malvestanta Taisja. Avino Eŭdoĥa kun Krikov ekhejtis la banejon, vekiĝinta Jegorĉjo kuradis tien kaj reen kun manĝetoj — manĝigi la vojaĝintojn; la koĉeron la oficiroj regalis per vodko, demandis, kiu venis. La koĉero drinkis, viŝis sian buŝon, dankis, rakontis, ke li alveturigis bonan virinon, dum la tuta vojo ŝi eĉ fojon ne plendis pri li, neniu lin batis al la dentoj, ŝi nutris lin per siaj vojprovizoj.

Jam estis mateniĝo, kiam Manjo kun la filinoj revenis el la banejo kaj eksidis al la ordigita tablo — ĉu tagmanĝi, ĉu matenmanĝi, ĉu vespermanĝi. La knabinoj manĝis silente. Ivaĉjo, ne ekdorminta en la bruo kaj tumulto, ĵetadis al ili scivolajn rigardojn. Taisja regaladis, ĝojis, ke jen nun ankaŭ Silvestro Petroviĉ ekvivos, kiel aliaj homoj vivas, — kun la tuta familio. La okuloj de Manjo karese lumis, dum la vojo ŝi maldikiĝis, ŝia knabina vizaĝo iĝis eĉ pli subtila. Silvestro Petroviĉ, admirante la edzinon, diris nelaŭte:

— Vi duan fojon en Arĥangelskon venis. Ne eviteblas nun ankaŭ la tria. Kaj eble, ni ĉi tie por ĉiam restos. Konstruos domon apud Dvino, kaj vivos. Ĉu, Manjo?

Manjo ridetis, ŝia rigardo diris: «Kie vi diros — tie ni vivos!»

— Kial vi silentas, silentulino? — demandis Silvestro Petroviĉ. — Rakontu, kio estas en Moskvo? Kiun vi vidis, kion vi aŭdis?

— Mi alveturigis leterojn — tutan sakon, — diris Manjo. — Ĉiuj al vi skribas, Silvestro Petroviĉ, — kaj Apraksin, kaj Izmajlov...

— Izmajlov? — miris Silvestro Petroviĉ.

— Li. El Danio — li estas ambasadoro tie en urbo Kopenhago. Menŝikov skribas, Aleksandro Daniloviĉ, kelkaj aliaj el via kompanio...

Jegorĉjo alportis la sakon, malbukis rimenojn, demetis vaksosigelon. Silvestro Petroviĉ, alŝovinte al si kandelon, kuntirante la brovojn legis malgrandajn liniojn de la letero de Izmajlov. Manjo demandis maltrankvile:

— Ĉu li ion malbonan skribas?

— Andreon Jakovleviĉ-on, princon Ĥilkov-on, svedoj arestis, — diris Ievlev severe, — li sidas sub forta gardo, je ĉio senigita, kaj lia sano estas malforta...

Manjo kunfrapis la manojn, ĉesis manĝi. Silvestro Petroviĉ ree eksusuris per folioj de leteroj. En la veninta silento Ivaĉjo subite diris al la Ievlev-aj knabinoj:

— Kaj oĉjo Ataĉjo nun spadon havas. Ĉu mi montru?

La knabinoj sen respondi, ŝmacante, kun apetito estis manĝantaj grasajn blinojn.

— Ĉu vi estas senlangaj? — demandis Ivaĉjo.

— Ni manĝi deziras! — diris la pli aĝa.

— Nu, manĝu! — permesis Ivaĉjo.

Kiam Manjo kun la infanoj kaj Silvestro Petroviĉ foriris en sian duonon, Krikov, alfiksante la spadon, mallaŭte, per solaj lipoj demandis:

— Kia do estos via decido, Taisja Antipovna?

Taisja suspiris, rigardis flanken.

— Mi ne urĝas! — kvazaŭ ektiminte, ekparolis Krikov. — Mi, Taisja Antipovna, atendos kiom vi ordonos. Jaron, ankoraŭ du... Nur lasu min esperi, faru tian favoron...

— Multe vi bonkoras al mi, Atanazio Petroviĉ, kaj tion mi neniam forgesos.

— Bona komenco! — malgaje subridis Krikov. — Nun ja mi scias, kia estos ankaŭ la fino...

— Amas mi lin por eterne, ĝis mia ĉerko, Atanazio Petroviĉ. Kiel do fari?

Krikov riverencis mallerte, trovis la mantelon, eliris, dense ferminte post si la pordon. Jam tute venis tago, malvarma, ne printempa, kun pikanta frosta vento. Laŭ la kurba Pulva strato, devancante Atanazion Petroviĉ-on, kanonistoj trote traveturigis al Dvino du novajn kanonojn; pafistoj responde al krioj de la kanonistoj larĝe malfermadis gardajn barierojn. En la korto, kie estis gisataj kanonoj, oni estis sonorigantaj batilon, kunvokante homojn al laboro. Rajdantaj dragonoj turnis sin al interstrato — por dormi post malproksima nokta patrolado. Elirinte al la kajo, Krikov malrapidigis la paŝojn: la printempa suno subite aperis el trans malhelaj nuboj, ekludis sur preĝejaj kupoloj, sur muskedoj de pafista cento, iranta al trejnado, sur pintoj de bajonetoj, sur jungilaro de la tatara ĉevaleto sub centestro

Merkurov.

— Al kapitano Krikov — prezentu armilojn! — komandis Merkurov per gaja voĉo.

La pafistoj strabis, klare marŝante per kadencaj paŝoj, movis la muskedojn supren kaj maldekstren. Merkurov eligis la spadon el la ingo, salutante. Krikov elmetis la sian. Lia koro ekbatis pli gaje, la soldatoj rigardis kun karesa kompato, — ĉiuj konis lian sorton.

— Bonan trejnadon! — diris Atanazio Petroviĉ al malalta soldato, postkuranta la ceterajn. — Ĉu vi aŭdas, Petruniĉev?

Petroviĉ respondis dum kurado:

— Poste ni vidos, kia estis trejno. La svedon ni demandos...

Liaj botoj disglitis sur glacio, li lerte saltis kaj ekstaris en la vicon. Krikov ridetis, kun fajfo mallevis la spadon en la ingon, ekpaŝis pli rapide — trejni siajn doganistojn.

Sed tuj kiam li turnis sin en mallarĝan strateton, nomatan Ankra — pro tio ke ĉi tie tenis forĝejon ankra majstro Ŝestov, — al li renkontiĝis malgaja procesio, pro kio peze ekdoloris lia koro: pare mankatenitaj kaj ligitaj ĉiuj ses al peza fera stango, iris, timigante per si metiistojn kaj petante laŭ la moro almozon, torturitaj de la bojaro vojevodo malliberuloj. Malgraŭ la frosto, ili iris en ĉemizoj kun sekiĝinta sango, por ke vidu la popolo verecon de la torturo, peze lamis kaj, spirante kun stertoro, petadis la kristanojn je la Krista nomo, helpi per kio ili povas. La kristanoj per silenta amaso akompanadis la torturitojn kaj avaris nek monon, nek bulkojn, nek sekan fiŝon. Unu metiisto elportis eĉ kruĉon da brando, kaj la torturitoj sur la loko trinkis po gluto ronde. La eskortanto same deziris gluti,

sed al li iu faris piedbaton de malantaŭe, li balanciĝis kaj verŝis la restintan brandon.

— En la transmondo al vi estos vino! — diris alta voĉo el la homamaso. — Tie vi drinkos...

— Li ne kulpas! — diris unu el la torturitoj. — Kial vi lin atakas! Cara servo, ĉu li povas eviti...

Unu torturito, malalta, kun bruligitaj manplatoj, nenion povis teni en la manoj — lin trinkigis per lakto el argila taso iu maljunulino. Li riverencis al ŝi malalte, diris ne petante, ordonis:

— Vi por mi funebran diservon faru, avino. Min oni hodiaŭ finos...

Alia, pli alta, kun maldika vizaĝo, kun pensema rigardo, konfirmis:

— Lin oni finos...

Kaj tria kun lamentoj rakontadis al la popolo pri torturoj — kiel oni levas sur pendigilon, kiel eltordas la brakojn, kiel bruligas per fajro. Aliaj silentis, apenaŭ tenante sin sur la piedoj. Nek Vataĵnikov, nek Gridnev estis inter ili...

Krikov forte kunpremis la dentojn, ekiris pluen...

Ĉapitro tria

...Mi lupojn nur amas;
Mi restas plu lup', kaj mia kor'
Kaj dentoj miaj plu samas!

Heine

1. Sekreta agento de la reĝo

Vespere en la militan havenon de Uleaborgo malrapide eniris sesdekremila galero sub la sveda militflota flago — ora kruco sur blua kampo. Sur la bordo, en humida krepusko, dufoje bojis kanono. Ŝipestro de la galero Munck Ahlström ordonis respondi per konvencia signalo — du muskedaj pafoj — kaj ĵeti la ankron por malŝarĝado. La asistanto de la ŝipestro — supera ferdekestro — Sigge ekfajfis per arĝenta fajfilo. La galeraj remistoj — bagnuloj, alkatenitaj per ĉenoj — levis la remilojn. Ekknaris ankrovinĉo, kaj la trišpata ankro peze falis en la akvon.

— Mallevi gigon! — envolvante sin en mantelon, subŝtofita per vulpa pelto, ordonis Ahlström. — Strikte kontrolu la remistojn, en tiu ĉi perdita loko bagnuloj konstante faras fuĝojn. Komencu malŝarĝadon sen mi, mi revenos ne baldaŭ.

La kurbbuŝa, brulvundita en bataloj Sigge staris antaŭ la ŝipestro en atentopozo. La ŝipestro estis pensanta.

— Eble, mi drinkos! — prononcis li. — Ĉi tie, en taverno, okazas bona vodko. Kial ne drinki?

Du helpantoj de la ferdekestro akompanis la ŝipestron al la ŝtuparo. La ŝipestro iris malrapide, konservante sian dignon. La

ferdekestro ekfajfis trian fojon — al purigo de la ŝipo. Muzikistoj en mallongaj kaftanetoj, bluaj pro malvarmo, per hokstangoj trenis al la ŝipflanko mortantan remiston, razitkapan bagnulon. Li ankoraŭ ĝemis kaj petis ne mortigi lin, sed al liaj piedoj jam estis ligita ŝtono, por ke la pekulo dronu tuj, kiel konvenas al papisto, malamiko de la vera reformita eklezio.

Sur la bordo, en taverno «Rendevuo de fiŝistoj», ŝipestro Ahlström renkontiĝis kun la havenestro kaj transdonis al li paperojn kun indiko de nombro de kanonoj, liveritaj sur la galero. Krom tio, la galero liveris por la armeo biskotojn en bareloj, grion kaj buteron.

— Parto de tritiko malsekiĝis kaj ne plu povas esti uzata por nutrado! — diris ŝipestro Ahlström. — Ni trafis en ŝtormon.

La havenestro kapjesis. Ahlström dekalkulis al li monon — pro la tritiko kaj pro ĉio, kion ili dividadis inter si frate. Servisto alportis vodkon, ovaĵon kaj prunojn en vinagro. La havenestro ordonis kuiri anglan trinkaĵon — grogon.

Post horo ambaŭ maristoj estis blekegantaj kanton, globiginte la okulojn unu al la alia:

Kiu revenos hejmen post ŝtorm',
Rakontu al mia anĝel',
Ke sub ondo mi trovis lokon por dorm',
Por mi mankas la lok' en ĉiel'...

Ies peza mano kuŝiĝis sur la ŝultron de ŝipestro Ahlström. Li deskuis la manon ne retroturniĝinte. La mano kuŝiĝis ankoraŭ foje — pli peze. Ŝipestro Ahlström returniĝis en furiozo: antaŭ li staris homo en nigra vesto de kuracisto, kun akra rigardo, kun malhela vizaĝo.

— Kian diablon vi de mi bezonas? — demandis Ahlström.

— Vi bone pasigas vian tempon, dum de via galero fuĝas rusaj bagnuloj, — diris la nekonato. — La subadmiralo de la galera floto de la krono apenaŭ laŭdos vin...

Ahlström komencis malrapide malebriiĝi. La havenestro plu penis finkanti la kanton.

— Sed vi kiu estas? — demandis Ahlström per malfirma voĉo.

La nekonato eksidis sur benkon, demetis la ŝuon kaj per tranĉilo deŝiris la kalkanumon. En la kalkanumo estis kaŝujo. El la kaŝujo la nekonato elprenis kupran kapsulon, malfermis ĝin kaj metis antaŭ la ŝipestro kvadratan peceton de maldika pergameno, sur kiu per gotikaj literoj estis skribite, ke Lars Des-Fonteines estas sekreta agento de lia reĝa moŝto kaj ĉiuj regnanoj de la krono sub minaco de senigo je la vivo devas en ĉio helpi al la menciita agento.

— Ĉu de ĉi tie vi iras al Stokholmo? — demandis Lars Des-Fonteines.

— Al Stokholmo, *herre*...

— Mi havas rangon de ĉefleŭtenanto! — seke diris Des-Fonteines. — Vi prenos min sur la ŝipon. Mi konsilas al vi sobriĝi kaj fari ordon en la galero...

Nokte timigita ŝipestro Ahlström estis klariganta al sia gasto, ke la bagnuloj mortas pro malsato, ke tri uncoj da biskotoj dum tago por remisto kondukas al plena konsumiĝo de fortoj, ke nur dum la iro de Stokholmo ĝis Uleaborgo en la maron estis elĵetitaj dek ses kadavroj de bagnuloj. Des-Fonteines rigardis en la septon de la kajuto per malplenaj

okuloj kaj, ŝajnis, ne aŭskultis. Al la flanko de la galero estis frapantaj gigoj, tie, en lumo de torĉoj, estis okazanta elŝarĝado de kanonoj, kuglegoj kaj provianto.

— Kiom da homoj fuĝis? — demandis Des-Fonteines.

— Naŭ. Tri jam estas kaptitaj.

— Kiu helpis al ili malkateniĝi?

— Ruso el militkaptitoj.

— Mi mem faros enketadon! — diris Des-Fonteines.

Ferdekestro Sigge kaj du liaj helpantoj kondukis en la kajuton katenitan homon kun razita kapo kaj kun malrapida, singarda parolo.

— Ĉu vi estas ruso? — demandis Des-Fonteines.

La bagnulo respondis senhaste:

— Ruso.

— Kiel vi nomiĝas?

— Antaŭe oni nomadis min Ŝĉerbatij, sed nun mi vivas sen nomo. Oni donis alnomon, kiel al hundo.

Des-Fonteines atente rigardis al la bagnulo. Ferdekestro Sigge respekte raportis, ke antaŭ la fuĝo la krimuloj ricevis de Ŝĉerbatij leteron.

— Ĉu vi donis al ili leteron? — demandis Des-Fonteines.

— Estis nenia letero! — diris Ŝĉerbatij.

— Vi estas tiu spiono, kiu denuncas al la moskvianoj pri preparoj de nia ekspedicio en la urbon Arĥangelskon. Ĉu tiel?

Ŝĉerbatij silentis.

La ĉefleŭtenanto, ne ekstarante, batis lin per la pugno de malsupre supren en la mentonon. La ruso ŝanceliĝis, el lia buŝo verŝiĝis sango.

— Vi havas vian homon en Stokholmo. Ĉu tiel?

Ŝĉerbatij senvorte viŝis la buŝon per la polmo.

— Kiu estas via homo en Stokholmo? Parolu, alie mi de vi viva deŝiros la haŭton.

Ŝĉerbatij suspiris kaj nenion diris.

— Metu lin en la pruan holdon! — en la sveda ordonis Des-Fonteines. — Ordonu al fidinda homo senĉese per gutoj verŝadi sur lian verton malvarman akvon. Homoj, kiuj verŝados la akvon, devas ŝanĝiĝi post ĉiuj du horoj — tio estas ne simpla laboro. Mi mem observos la ekzekuton...

Antaŭ mateniĝo la galero levis la ankron. Des-Fonteines en longa mantelo, en ĉapelo, surŝovita sur la okulojn, leviĝis sur la poban plankon, kie en sia fotelo, sub la flago, flirtigata de vento, sidis ŝipestro Munck Ahlström. La muzikistoj per timbaloj estis batantaj takton por la remistoj. La remistaro, po kvin bagnuloj sur unu benko, kun obtuza suspiro levadis la fuston, la remilo malleviĝadis en la akvon, la homoj kliniĝadis malantaŭen — remadis. Monotone kaj obtuze batadis granda tamburo, fajfadis kornoj, kun sonoro ululadis timbaloj. La du subferdekestroj kun longaj knutoj staris en la mezo kaj en la pruo de la galero, por vipi la nudajn dorsojn de la remistoj. Matroso el liberuloj — longvizaĝa holandano, kurbiĝinte, por hazarde ne trafi sub baton de knuto, iradis inter la bagnuloj, ŝovadis en la buŝojn de malfortiĝantoj flanojn el sekala pano, maceritajn en vino.

— Rapido? — demandis la ĉefleŭtenanto.

— Kvin knotoj! — respondis Sigge.

— Kaj ĉu pli multe vi ne kapablas?

— Eble, poste ni levos velojn...

La ĉefleŭtenanto silente rigardis al la remistoj. Bagnulo sur la sesa benko falis per flanko sur sian najbaron. La helblonda holandano rampe trairis al la mortanto kaj komencis bati per martelo al ĉizilo, — la remisto ne plu bezonis katenojn. La ĉeno defalis de la ringo. Alia liberulo — en pelta veŝto — per hokstango kroĉis la bagnulon je la pantalono kaj eltrenis en la pasejon.

— Ekster la ŝipon! — ordonis Sigge.

— Jes, ekster la ŝipon! — ripetis la subferdekestro kaj, montrinte la dentojn, knutis la remiston, kiu, rigidiĝinte, per rigardo akompanis sian pereintan kamaradon.

Nun la timbaloj ululadis pli rapide. Kun grinco kaj knaro moviĝadis la remiloj en grandegaj remilingoj. De la duonnudaj remistoj iris vaporo.

— Kiom da bagnuloj vi havas? — demandis Des-Fonteines.

— Ĉirkaŭ kvin cent! — respondis Ahlström.

— Ĉu estas multe da rusoj?

— Pli ol duono. Post Narvo ni ricevis dek kvin mil homojn. Oni pelis ilin al Revalo, sed tie mankis per kio nutri ilin. Ili deziris manĝi kaj atencadis havaĵon de urbanoj. La loĝantoj ricevis armilojn, por ke ĉiu povu laŭ sia bontrovo defendi sin kontraŭ la kaptitoj. Al ili oni pafadis kiel al hundoj. Tiuj, kiuj restis vivaj, estis donitaj al galeroj. Krom rusoj, ni havas ankaŭ

svedojn. Nun per galeroj estas punataj ribeluloj, aŭdacintaj malobei sian nobelon...

— Ĉu tiaj estas?

— Nemalmulte, *herre* ĉefleŭtenanto. Kaj Lutero ja diris: «Kiu povas, strangolu kaj piku, kaŝe aŭ malkaŝe, — kaj memoru, ke ne estas io pli venena, malutila kaj malhonesta, ol ribeluloj».

Ĉefleŭtenanto kapjesis:

— Olda Lutero estis saĝa.

— Lia reĝa moŝto, — diris Ahlström, — daŭrigu la Sinjoro liajn tagojn, — estas fidela luterano, kaj nun vi apenaŭ trovos en Svedio ribelulon, ne punitan laŭmerite.

Des-Fonteines silentis, kunmetinte sub la mantelo la manojn sur la brusto. Lia severa malhela vizaĝo estis nenion esprimanta, la okuloj rigardis foren, en neĝan maran obskuron.

— Antaŭ nelonge ribelis kamparanoj de subadmiralo Gyllenstierna, — daŭrigis Ahlström. — Tio estis nelonge antaŭ tiam, kiam la subadmiralo edziĝis. Eble, vi ne scias, ke la nupto de grafo subadmiralo estis festata en la reĝa palaco kun pompo kaj lukso, indaj je nia subadmiralo...

La ĉefleŭtenanto demandis, oscedinte:

— Ĉu la fianĉino aĝas same kiel li? Sesdek jarojn?

Ahlström ekridis:

— Ho ne, *herre* ĉefleŭtenanto. Baronino Margret Strömberg aĝas ne pli ol tridek...

Lars Des-Fonteines abrupte turniĝis al la ŝipestro. En unu

momento lia vizaĝo griziĝis.

— Ĉu Margret Strömberg? Ĉu vi parolas pri la filino de grafo Piper?

— Jes, *herre* ĉefleŭtenanto. La baronino vidviniĝis antaŭ kvar jaroj kaj post paso de la funebra tempo edziniĝis duafoje al nia subadmiralo.

La ĉefleŭtenanto subridis:

— Jes, jes, — diris li, — ĉio okazas en la mondo, ĉio ekzistas...

Li ree forturniĝis de Ahlström, kaj lia vizaĝo denove iĝis trankvila. La ŝipestro rakontis pri la ribelo de la kamparanoj de Gyllenstierna kaj pri tio, kiel multaj el ili estis senditaj al galeroj. Des-Fonteines aŭskultis ne interrompante. Poste li demandis:

— Do, en Svedio ĉio estas bona?

— Jes, en Svedio ĉio estas bona.

— Kaj kion oni diras pri milito kontraŭ Rusio? — strange ridetante, demandis la ĉefleŭtenanto. — Eble, post kiam ni frakasis la moskvianojn ĉe Narvo, ĉiuj deziras militi plu?

— La svedoj deziras tion, kion deziras la reĝo, — respondis singardema Ahlström. — La svedoj alte respektas sian reĝon, per kies zorgoj, kun Dia helpo, la tuta mondo tremas antaŭ ni.

2. Diru sciatajn de vi nomojn!

Kiam la suno leviĝis alte, la ĉefleŭtenanto ordonis al la ŝipestro de la galero pendumi sur pinto de jardo la unuan el la kaptitaj fuĝintoj. La galera ekzekutisto alportis pretan maŝon.

La fuĝinto — larĝaŝultra kaj fortika homo, aĝa ĉirkaŭ tridek jarojn, kun ĝisnude razita kapo, kiel ĉe ĉiuj remistoj — malrapide pririgardis la senventiĝintan maron, kovritajn de neĝo forajn bordojn de Svedio, altan helbluan nordan ĉielon, kaj diris kun forto en la raŭka voĉo:

— Do bone... ankaŭ Miĉjo Ĉistjakov estu en via ŝuldo...

Li riverencis malalte al la tuta razitkapa, katenita remistaro kaj mem surmetis sur la kolon la maŝon. La ekzekutisto volvis sur la nodoplenan manon kanaban ŝnuron kaj intencis pendumi, sed la ĉefleŭtenanto levis la manon en funela ganto kaj demandis la kondamniton, kiel li aŭdacis adiaŭi kun la bagnuloj kaj al kiu li minacis. La bagnulo-fuĝinto movis al Des-Fonteines la lacajn, elturmentitajn okulojn kaj silente mallevis la kapon.

— Pendumato, vi ankoraŭ povas ŝanĝi vian sorton! — diris la ĉefleŭtenanto. — Jen mi metas sablohorloĝon. Post tri minutoj la sablo transŝutiĝos el la supra vazo en la malsupran. Dum tiu tempo pensu pri tio, kiel bona estas la vivo kaj kiel estas frue por vi morti. Vi povas meriti pardonon per tio, ke vi diros sciatajn de vi nomojn ĉi tie kaj en Stokholmo.

La ĉefleŭtenanto renversis la sablohorloĝon. La orkolora sablo roje verŝiĝis malsupren.

La kondamnito silentis, mallevinte la kapon. La ekzekutisto staris senmove, la ŝnuro estis volvita sur lian nudan manon.

La sablo estis ŝutiĝanta.

— Vi ne sukcesos tiel facile morti! — diris Des-Fonteines. — Mi ŝanĝis mian decidon. Oni vin ne pendumos, sed knutos al la nuda korpo ĝis tiu momento, kiam vi diros la nomojn aŭ

mortos.

La maŝo de la kolo de Ĉistjakov estis demetita.

Sur la dekstra pasejo la ekzekutisto metis larĝan benkon kaj alligis al ĝi Ĉistjakov-on. Antaŭ la tagmezo la fuĝinto mortis, ne dirinte eĉ unu vorton.

— Tielas ili ĉiuj! — diris la ĉefleŭtenanto al kapitano Ahlström. — Oni devas esti frenezulo aŭ stultulo, por entrepreni militon kontraŭ tiu popolo.

La ŝipestro interrigardis kun ferdekestro Sigge. Kion diras la ĉefleŭtenanto? Ĉu li komprenas, kiu estas tiu frenezulo kaj stultulo?

— La sveda sobra prudento, kie vi estas? — kolere ekkriis Des-Fonteines. — Sufiĉas ĵeti rigardon al la mapo de Moskvio, por kompreni tutan absurdecon de tiu entrepreno.

La ŝipestro interrigardis kun la ferdekestro duan fojon.

La galero plu iris kun rapido de kvin knotoj.

Des-Fonteines ordonis pendumi sur jardo la korpon de la knutmortigita ruso kaj malleviĝis en la antaŭan holdon. Ŝĉerbatij, alkatenita al la septo, ekrigardis al li per vaganta malklara rigardo. Akvo per maldika strio estis verŝiĝanta sur lian razitan kapon. La lipoj de la ruso moviĝis, la ĉefleŭtenanto kliniĝis al li:

— Ĉu vi deziras paroli kun mi?

— Ne parolos mi kun vi!

Des-Fonteines provis la akvon — ĉu ĝi estas sufiĉe malvarma. La akvo estis el ekster la ŝipo — glacia. Ŝĉerbatij tremis, liaj lipoj senĉese ion flustradis.

— Mi timas, ke al li nemulte restis vivi! — diris svedo-matroso. — Eble, ĉesigi tion por tempo?

La ĉefleŭtenanto nenion respondis.

Dum la tuta tago la ĉefleŭtenanto silente promenadis sur la galero kaj pensadis siajn pensojn. En krepusko subite freneziĝis malgranda rusa bagnulo. La holandano-superrigardanto kiel kato saltis al li. La frenezulo, surverŝita de sango, estis ŝiriĝanta el la ĉeno. La superrigardanto batis lin per genuo al la ventro kaj ŝtopis lian buŝon per greka spongo. Nokte la frenezulon, ankoraŭ vivan, oni elĵetis ekster la ŝipon, alliginte al la piedoj ŝtonon.

Sur la jardo estis balanciĝanta la korpo de la fuĝinto, pendumita post la morto.

Estis egalmezure batantaj la timpanoj.

Laŭ fajfo de la ferdekestro, de ĉiu benko tri el la remistoj faladis sur la ferdekon — ripozi, du — remadis. La korpo de la pendumito turniĝadis sur la ŝnuro. Ĉiu el la remistoj vidis, kio atendas lin, se li aŭdacos fuĝi kaj estos kaptita.

Ŝipestro Ahlström en sia kajuto estis finskribanta denuncon pri ĉefleŭtenanto Des-Fonteines. Ferdekestro Sigge subskribis kiel atestanto. Li same aŭdis la vortojn, per kiuj la ĉefleŭtenanto malhonorigis lian reĝan moŝton.

— Nia reĝo estas frenezulo! — diris Ahlström, surŝutante la denuncon per sablo.

— Indulgu lin sankta Brigita! — preĝe prononcis Sigge.

— La moskvianoj estas nevenkeblaj! — diris ŝipestro Ahlström. — La reĝo estas stultulo. Ĉu vi aŭdis ion pli ofendan

por lia reĝa moŝto?

La ferdekestro balancis la kapon: ja renkontiĝas en la mondo arogantuloj!

— Tiaj, kiel li, finas sian vivon sur ekzekuta ŝtipo en kastelo Gripsholmo! — diris la ŝipestro. — Sed ne tuj. Unue ilin prilaboras torturisto, la plej bona torturisto de la reĝlando. Kaj nur pensu, ke tiu latrono aŭdacis krii al mi, kiam fuĝis la kaptitoj...

Supre plu estis batanta la tamburo, ŝrikadis la kornoj, ululadis la timpanoj.

La ĉefleŭtenanto staris sur la pruo de la galero, rigardis foren kaj flustre deklamadis sonorajn strofojn de la «Kroniko de Eriko»:

Kaj tiam levitaj estis armiloj,
Kaj kuniris ili en morta duelo,
Kuniris por ke unu el ili venku,
Kaj la dua el ili mortu...

3. Oni ekstreme malkontentas pri vi!

Kiam la galero aliris al Skeppsbron — la ŝipa kajo de Stokholmo, subite ekfalis ofta eta neĝo. Ardezaj kaj plumbaj tegmentoj de Staden tuj kaŝiĝis de rigardo, trans neĝa vualo malaperis ĝibaj pontoj, palacoj, la Sala maro — Saltsjön, ŝipoj en rodo kaj ĉe albordiĝejoj...

Des-Fonteines, en mantelo, en malalte surŝovita ĉapelo, staris ĉe la ŝipflanko, rigardis, kiel oni ĵetas la ponteton. Ŝipestro Ahlström, riverencante, petis pardoni lin, se en la vojo al la ĉefleŭtenanto estis nesufiĉe komforte. Des-Fonteines

morne silentis. Li ne aŭdis la babiladon de ŝipestro Ahlström. La varmaj lumoj de Stokholmo — la urbo, pri kiu li tiel ofte pensadis en la fremdlando, — estis ekbrulantaj sur lia vojo. Kelkaj malpezaj sledoj devancis lin; gajaj knaboj, dancetante, trakuris renkonten; lanternisto kun eskalo, kiel en fora infaneco, eliris el mallarĝa strateto...

La koro de ĉefleŭtenanto batis ofte, li emociiĝis kiel junulo. Antaŭ multaj jaroj li forlasis tiun ĉi urbon. Kaj jen li denove estas ĉi tie — kvazaŭ ne forveturis...

Sur malgranda ronda placo sub malrapide falanta neĝo li staris iomete. Leono, levinte la antaŭan piedon, kvazaŭ minacante, sidis ĉe la fontano — la malnova leono, ĉizita el ŝtono, kun kolhararo, surŝutita de neĝo. Kaj en la taverno apude iu ludis liuton, same kiel antaŭ multaj jaroj.

En la sama vespero Des-Fonteines en blua uniformo de ĉefleŭtenanto de la reĝa floto, kun spado kaj en blankaj gantoj, per facilaj paŝoj eniris en la hele prilumitan akceptejon de grafo subadmiralo Erik Gyllenstierna, kiu inter ceteraj siaj multaj devoj estris ĉiujn sekretajn agentojn de la reĝo.

Al la ĉefleŭtenanto estis dirite, ke la grafo estas okupita kaj nun ne akceptas.

— Mi atendos! — prononcis Lars Des-Fonteines kaj eksidis sur malnovan kverkan benkon.

Preter li pasadis unu post alia flotaj subleŭtenantoj kun apenaŭ aperantaj lipharoj, orgojlaj kaj arogantaj admiraloj en ore broditaj uniformoj, eĉ ŝipaj pastroj. La grafo estis akceptanta ĉiujn. Nur li, Des-Fonteines, reveninta el Moskvio kun fidindaj informoj, necesis al neniu. Sed li sidis, kunmetinte

la manojn sur la brusto, rigardante malkontente per malbonkora, akra rigardo, atendis. Kaj ne ĝisatendis: la grafo foriris el sia kabineto, preterinte la akceptejon.

— Tiuokaze oni pagu al mi mian monon! — akre diris la ĉefleŭtenanto. — Mi esperas, la monon mi rajtas ricevi?

Kaduka maljunulo, koninta ĉiujn agentojn laŭvide, respondis venene:

— Ĝuste duonon de via mono sukcesis ricevi via patro — li ĉi tie trafis en embarason, kompatinda. Kaj la alian duonon vi ricevos, sed ne tre baldaŭ, — nun la tempo ŝanĝiĝis. Kio koncernas akcepton fare de grafo subadmiralo, do al vi tute ne necesas hasti. Nenio bona vin atendas trans tiu ĉi pordo: oni ekstreme malkontentas pri vi!

Elirante el la domo de la speciala kancelario, Des-Fonteines en neĝa obskuro preskaŭ kunpuŝiĝis kun la galera ŝipestro Munck Ahlström. La ĉefleŭtenanto ne rekonis la ŝipestron kaj, ĝentile pardonpetinte, surĉevaliĝis. Kaj ŝipestro Ahlström, atendinte iom, frapis per ligna martelo al la ferkovrita pordo kaj, kiam la pordisto malfermis, kun riverenco transdonis al li sian denuncon, adresitan al reĝa prokuroro Axel Sparre.

En tiu ĉi nokto Des-Fonteines, unuafoje dum ok jaroj, drinkis ĝis ebrio. Li drinkis sola. Servisto, sekiĝinta kvazaŭ egipta mumio, verŝadis por li kalikon post kaliko. La ĉefleŭtenanto drinkis avide, per grandaj glutoj. Malrapide forklakadis tempon malnova horloĝo sur kameno, la pendolo en formo de nigra virino kun enfalintaj okulkavoj falĉadis per falĉilo — la morto estis rikoltanta fruktojn de rapide pasantaj tagoj. Des-Fonteines drinkis kaj rigardis, kiel falĉas la morto...

Nokte, ŝanceliĝante, li eniris en tavernon, kie estis drinkantaj komercistoj, oficiroj de la gvardio de trabantoj, kavalerianoj kaj bazaraj monŝanĝistoj. Stratulinoj en kufoj kaj subjupoj estis dancantaj sur kverka tablo, apude estis aŭguranta sortodivenisto, plue oni estis ĵetantaj kubojn — para aŭ nepara. Kvar oficiroj estis kantantaj novan kanton pri la malgloro de la rusoj ĉe Narvo. Des-Fonteines elaŭskultis la kanton ĝisfine kaj diris al la oficiroj, ke ili estas stultuloj kaj anstataŭ cerboj ili havas sterkon.

Juna oficiro, kun lanugo anstataŭ lipharoj, salte ekstaris kaj kriis, ke li ne permesos eldiri malĝentilaĵojn. Des-Fonteines tiris lin je la nazo per du fingroj. Mateniĝe, kun peza kapo, nenion komprenante, li aŭskultis, kiel alta variolmarkita kapitano legas parkere la malnovan leĝon pri farado de duelo:

«Se viro diros insultan vorton: «vi ne estas viro en la koro kaj ne egalas al viro», kaj alia diros: «mi estas viro, kiel vi», — tiuj du devas renkontiĝi en kruciĝo de tri vojoj. Se venos tiu, kiu aŭdis, kaj tiu, kiu diris la vorton, ne venos, tiam li trifoje krios: «maliculo!» Kaj faros markon sur la tero. Tiam tiu, kiu diris la vorton, estos malpli bona, ol li, ĉar ne kuraĝas defendi per armilo tion, kion li diris per la lango. Nun ambaŭ devas batali. La mortigito devos kuŝi en malbona tero».

Des-Fonteines elĵetis la spadon el la ingo kaj ekstaris en la pozicion. La junulo, kiun li nokte tiris je la nazo, faris sinsekve du malsukcesajn atakpaŝojn kaj perdis malvarmsangecon. En la sesa minuto de la duelo la ĉefleŭtenanto per la klingo trapikis la gorĝon al sia kontraŭulo, eltiris la spadon, viŝis la pinton per la rando de la mantelo kaj foriris al Norrmalm — al la vilaĝo, por drinki plu. La sekundantoj, mallevinte la kapojn, staris en

humida vento, kantis psalmon super la mortinto. Ili enterigis lin samtie, ĉe la kruciĝo de tri vojoj, kaj drinkis flavan maltan vodkon per mono, kiu troviĝis en lia monujo.

La tutan tagon Lars Des-Fonteines trasidis ĉe kverka lama tablo en taverno «Fidelaj amikoj». Li estis malebria kaj kolera. Malbonaj antaŭsentoj elturmentis lin. Kun malamo li rememoradis la vesperon, pasigitan en la akceptejo de grafo Gyllenstierna, la arogantajn oficirojn, la duelon, la jarojn, travivitajn en Moskvio. Jes, li, Des-Fonteines, ne plu necesas al iu ajn. Ne ekzistas homo, kiun interesus la vero, tiu vero, kiun li alportis kun si. Io okazis dum tiuj jaroj! Sed kio?

En krepusko el la urbo revenis la kadukulino, kiun li sendis al la nutristino de Margret. Sur paperpeco Margret skribis kelkajn vortojn, pro kiuj li eksentis febron. Ĵetinte al la maljunulino ormoneron, la ĉefleŭtenanto ekveturis tien, kie li estadis multfoje en tiuj foraj, nerevenigeblaj tempoj.

Super la urbo sterniĝis peza rufa nebulo. En lumo de peĉaj torĉoj estis malŝarĝataj grandegaj oceanaj ŝipoj. Staris dolĉa odoro de cinamo, de putrantaj fruktoj, alveturigitaj el foraj varmegaj landoj. Tondrante sur pavimŝtonoj, el la haveno rampis pezaj ĉaroj kun ŝarĝoj. En domoj de la antaŭurbo ekbruladis fajroj, butikistoj estis fermantaj ŝutrojn de siaj butikoj, stratulinoj, laŭte ridegante, alteniĝadis al matrosoj, tintigantaj ormonerojn en la poŝoj...

Kaj subite sur ekzercoplaco ekkantis soldataj klarionoj.

Des-Fonteines retenis la ĉevalon: la klarionoj kantis laŭte, arogante, ili estis multaj, kaj ankaŭ soldatoj estis multaj. En la antaŭaj tempoj klarionoj ne kantis tiel defie arogante kaj soldatoj ne marŝadis sur stratoj per tiaj grandaj taĉmentoj.

Sur blanka maldikkrura ĉevalo trarajdis kolonelo — korpulenta kaj liphara, post li, retroirigante sian virĉevalon, trarajdis la adjutanto, poste ekiris batalionoj. Kaj ĉio haltis: kaj la ĉaroj kun ŝarĝoj el la haveno, kaj la matrosoj kun siaj stratulinoj, kaj maljunuloj, hastantaj al preĝejo, kaj infanoj, kaj stratvendistinoj, kaj vendistoj de karbo kun siaj ĉaretoj...

Kadence paŝante per pezaj ferumitaj ŝuoj, marŝis reĝaj piediraj pafistoj en longaj kaftanoj kun kupraj butonoj, post ili moviĝis per speciala malpeza irmaniero karabenistoj, poste aperis kavalerio: peza — kirasuloj, meza — leĝerrajdistoj en manteloj, ĉiuj kun lipharoj, kaj, fine, husaroj sur magraj ĉevaloj en akompano de lancistoj ĉe ĉiu skadro. Krudaj soldataj voĉoj, insultoj, ŝercoj, komandaj krioj superis la pacan bruon de la urbo; ŝajnis, la soldatoj neniam trapasos — tiel multaj ili estis, kaj videblis, ke la popolo rigardas al la militistaro obeeme kaj ne sen timo...

«Jen por kio lia reĝa moŝto hardiĝadis en la junaj jaroj, — subite pensis Des-Fonteines, — jen por kio li meze de nokto ekstaradis de la lito kaj kuŝiĝadis sur plankon...»

Kaj la soldatoj plu iris kaj iris, kaj klarionoj plu kantis kaj kantis, sciigante la urbanojn pri tio, ke la vojo antaŭ la trupoj devas esti liberigita...

Finfine la regimentoj pasis la stratkruciĝon, kaj la urbo ree ekvivis per sia ordinara vivo...

La maljuna nutristino de Margret loĝis en domo, kies parton estis okupanta tenejo. Sur la supro mem de la ŝtona konstruaĵo, sub la tegoltegmento, en lumo de oleaj lanternoj, kvar fortikaj knabegoj, duonnudaj kaj blondaj, estis turnantaj brakon de vinĉo; kanaba ŝnurego, survolviĝante la tamburon, trenis

supren dense ligitajn pakojn da kotono. Tute same, kiel antaŭ multaj jaroj, nur se el malproksime ne estus ankoraŭ aŭdiĝantaj la arogantaj, laŭtaj sonoj de la soldataj klarionoj.

La ĉefleŭtenanto frapis al la konata pordo same, kiel antaŭ ok jaroj, — tri frapojn. Bruis la riglilo, kaj Des-Fonteines eniris en la malaltan kuirejon de la maljuna nutristino, kie estis apenaŭ bruletanta braĝo en la fajrujo.

— Ĉu tio estas vi? — demandis Margret per tremanta voĉo. Kaj ekkriis: — Ho, Lars!

Li subridis: tiu ĉi virino plu estis en lia potenco, li povis fari kun ŝi ĉion, kion deziris. Ŝi ĉiam estos en lia potenco, ne gravas, al kiu ŝi edziniĝus. Siatempe ŝi petegis lin foriri kun ŝi en sovaĝejon kaj loĝiĝi en pajlokabano sur bordo de rivereto, sed li ne konsentis: kun tiaj virinoj ne estas tro gaje en pajlokabano sur bordo de rivereto...

— Mi ne havis honoron gratuli vin pri la edziniĝo, — diris li malvarme. — Tamen, mi ne povis eĉ esprimi al vi kondolencojn rilate de la antaŭtempa morto de *herre* Magnus Strömberg...

Des-Fonteines vidis, kiel leviĝis kaj senforte malleviĝis ŝia mano, aŭdis, kiel susuris la silko.

— Sed vi... vi malestis! — plorante diris Margret. — Vi malestis senfine longe. Al mi eĉ ŝajnis, ke mi nur sonĝis vin en la jaroj de mia juneco...

— Ni ne parolu pri tio! Mi estas malriĉa, vi estas riĉa! Mi estos malriĉa ĉiam, vi ne povas vivi sen lukso. Vi senmonigis *herre* Strömberg-on, nun vi komencis senmonigi *herre* Gyllenstierna-n. Oro bruligas al vi la manojn. Mi estas ĉi tie

nelonge, sed jam aŭdis, kiajn ĉasojn kaj festenojn vi aranĝas preskaŭ ĉiutage. Vi ne tro malĝojis sen mi, Margret, ĉu vere? Kaj, verŝajne, vi agis prave. Ne indas ligi vian vivon kaj vian junecon, vian belon kaj ĉion, kion vi disponas, kun tia homo, kiel mi...

Li suspiris kvazaŭ en aflikto. Al ŝi ŝajnis, ke li ĝemis, sed kiam ŝi ĵetiĝis al li, li flankenigis ŝin per la mano.

— Mi ne necesas al vi, Margret, — diris li per la voĉo, per kiu li ĉiam paroladis kun ŝi, per voĉo, en kiu sonis preskaŭ vera malespero. — Mi ne necesas al vi. Kaj vi ne devas turmenti mian kompatindan koron, Margret. Mi je ajna kosto bezonas paroli kun via patro. Helpu min lastfoje...

— Kun la patro?

— Grafo Piper estas la sola saĝa homo en la reĝlando. Mi devas vidi lin nepre.

Ŝi silentis, pensante. Poste ekkriis:

— Mi faros tion! Vi estos akceptita. Sed kio okazis al vi, Lars? Ĉu vi estas en danĝero?

La ĉefleŭtenanto subridis amare:

— En danĝero estas ne mi. En danĝero estas Svedio.

Jam tute malheliĝis. Margret bruligis kandelojn, metis sur la tablon botelon da malnova vino, sukeraĵojn, fruktojn. Ĉio kiel antaŭe, kiel antaŭ multaj jaroj. La vizaĝo de Margret ruĝiĝis, la okuloj brilis, la oraj haroj disŝutiĝis sur la ŝultroj. Ŝi estis feliĉa. Kaj li kondutis tiel, kvazaŭ estus kortuŝita.

— Ĉu vi ree forveturos en Moskvion? — demandis ŝi.

— Mi dezirus tion.

— Mi fuĝos al vi tien! — diris ŝi, ridante. — Mi frenezigos ĉiujn moskvianojn. Mi veturos post vi en Moskvion...

Ŝi trinkis vinon kaj ne hastis foriri, kvankam estis malfrue. Des-Fonteines diris, ke proksimiĝas noktomezo, ŝi svingis la manon:

— Tutegale li tre multe scias pri mi. Estu tiel! Mi neniun bezonas, krom vin. Nur vin, ho Dio, nur vin...

Li sulkiĝis: li tute ne deziris, ke grafo Gyllenstierna estu lia malamiko. Sed Margret estis kisanta liajn manojn kaj petegis ne malestimi ŝin. Li ŝajnis al ŝi kavaliro, faranta misterajn heroaĵojn por gloro de sia sola damo. Ŝi jen ridis, jen ploris kaj ĵuris al li pri eterna amo. Pri siaj edzoj ŝi parolis kun malestimo kaj malamo kaj egale mokis kaj la mortintan kaj la vivantan. Li ridetadis al ŝiaj teruraj ŝercoj kaj kisadis la malsekajn pro larmoj okulojn.

En profunda nokto, elturmentita de amoro, malalte kliniĝinte al lia vizaĝo, ŝi flustris, kvazaŭ en febro:

— Mi estas tre riĉa, tre. Mi donos al vi monon. Por kio mi ĝin bezonas sen vi? Vi prenos tiom, kiom vi bezonas. Ĉu vi prenos?

Li silentis kaj ridetis. Tamen ŝi estis ĉarma, tiu ĉi virino, en sia frenezo. Kaj kiu scias, eble, ŝi ankoraŭ taŭgos al li?

4. Grafo Piper

Tiu maljunulo pravis: nenio bona atendis Des-Fonteines-on trans la pordo de la kabineto de grafo subadmiralo. Gyllenstierna akceptis la agenton de la krono stare, ne salutis, pri nenio demandis kaj tuj komencis riproĉon:

— Viaj raportoj, ĉefleŭtenanto, almenaŭ ne konformis al la vero. Vi ege troigas militajn eblojn de la moskvianoj. Lia moŝto la reĝo malkontentas pri vi. Dufoje lia reĝa moŝto bonvolis esprimi la penson, ke vi estas malbone kompetenta kaj tro memfida. Viaj raportoj ĉiam malkongruis raportojn de aliaj personoj, vizitantaj Moskvion. Ŝipestro Urquhart staras sur alia vidpunkto, ol vi. Kial ĝis nun mi ne ricevis de vi detalan planon de la Novdvina citadelo? Mi estas ankaŭ informita, ke vi apartenas al tiuj, kiuj permesas al si malaprobi agojn de lia reĝa moŝto...

Des-Fonteines aŭskultis la riproĉon silente, sed liaj okuloj moke brilis. Por li estis mizera tiu ĉi orgojla maljunulo, antaŭ multaj jaroj kondamnita al radumo pro siaj pirataj aventuroj, tiu ĉi altrangulo, pardonita de la forpasinta reĝo nur pro tio, ke la pirataj trezoroj plenigis la magriĝintan svedan trezorejon, tiu ĉi potencema kaj gala admiralo, pri kiu matrosoj diradis, ke li vendis sian animon al la diablo kaj ke nun anstataŭ koron li havas pecon da plumbo. Kio al li okazus — al la admiralo, se la ĉefleŭtenanto rakontus al li almenaŭ etan parton el tio, kio okazis hieraŭ en la kuirejo de la maljuna nutristino de Margret?

— Ĉi tie vi drinkas, — estis parolanta Gyllenstierna, — kaj, kiel mi scias, jam sukcesis en duelo mortigi junulon el bona familio. Pensu pri via estonteco! La reĝo elaŭskultos vin en la konsilio. Do via parolado estu racia. Vi multajn jarojn pasigis en Moskvio, vi scias malfortajn flankojn de la rusa militistaro. Do parolu pri tio, kio povas savi vian reputacion, sed ne ruinigi vian vivon. En la tagoj de via infaneco vi estis amikoj kun mia edzino, ŝi petis min pro vi, kaj tiun konsilon, kiun vi ricevis de mi hodiaŭ, mi donas al vi laŭ la peto de mia edzino.

La ĉefleŭtenanto ĵetis rigardon al la subadmiralo. Gyllenstierna rigardis al Des-Fonteines firme kaj orgojle, nenion eblis legi en tiuj malmildaj, kafkoloraj okuloj.

— Iru! — diris Gyllenstierna.

Des-Fonteines eliris.

En la sama vespero li ricevis inviton veni al grafo Piper — la ĉefo de la kampa kancelario de Karolo XII kaj la ŝtata sekretario. En la rondoj, proksimaj al la kortego, estis sciate, ke la patro de Margret siatempe ne tro aprobe rilatis al la milito kontraŭ la rusoj.

— Mia filino petis min akcepti vin! — diris grafo, kiam Des-Fonteines prezentiĝis al li. — Vi estis amikoj de infaneco, ĉu tiel?

— En malproksimaj tempoj, grafo, — diris Des-Fonteines. — En tiuj foraj tempoj, kiam vi ankoraŭ ne iĝis la fiero de la reĝlando kaj ne havis la titolon de grafo.

Piper afable ridetis. Li sidis en profunda fotelo — grasa, kun mallongaj, ne atingantaj la plankon kruroj. El sub grandega buklita peruko rigardis saĝaj penetrantaj okuloj.

— Mi aŭskultas vin! — diris li.

— Mi dezirus aŭskulti vin, grafo! — diris Des-Fonteines. — Mi delonge ne estis en la reĝlando. Mi dezirus scii, kion oni pensas ĉi tie pri Rusio.

— Caro Petro malgajnis Narvon, — kvazaŭ pensante, komencis Piper. — Malgajnis tiel, ke medalo, sur kiu estas prezentita lia malhonoro, nun estas treege populara. Al ni ŝajnas, ke la sola vojo por ni estas al Moskvo. Ni supozas, ke

kiam niaj flagoj flirtos sur la antikvaj muroj de Kremlo, tiam ĉio cetera okazos per si mem. Kokino en nia supo estos kuirita. La ora kruco sur blua kampo, levita super la rusa Kremlo, estas la sola racia solvo de la orienta demando, ĉu tiel? Lia reĝa moŝto bonvolas daŭrigi la aferon, pri kiu paroladis la bonfama Torgils Knutsson kaj la memorinda Birger. Sten Sture same instruis la hiperboreojn pri tio, ke ilia vojo kondukas nur orienten. Por kio do ni dronu en Ingrio aŭ Livonio, por kio ni bezonas etajn venkojn, se la gloro atendas nin en Moskvo?

Des-Fonteines silentis, senmove rigardante al la larĝa, rozkolora, trankvila vizaĝo de la grafo.

— Mi ankaŭ ĝuste scias, — daŭrigis Piper, — ke la bonfama reĝo Karolo IX plurfoje diris pri neceso por ni okupi la nordan parton de la bordo de Norvegio. La rusoj havas unu havenon — Arĥangelskon. Sufiĉas por ni kapti la nordon de Norvegio, kaj la komerco kun Arĥangelsko iros tra niaj akvoj. Por plenumo de tiu ĉi penso lia moŝto la nun reganta reĝo deklaris per sia ukazo ekspedicion al Arĥangelsko. La ŝipoj por la ekspedicio estas finkonstruataj. Arĥangelsko estos neniigita. Sed tio estas nur komenco, provizora rimedo por ĉesigo de la ligo de la moskvianoj kun Eŭropo. Moskvo — jen la vera solvo de la demando. Mi esperas, vi konsentas kun mi?

— Ne! — diris la ĉefleŭtenanto.

Grafo Piper rondigis la helajn akcipitrajn okulojn.

— Ĉu vi ne konsentas?

— Absolute ne konsentas.

— En kio do nome?

La ĉefleŭtenanto silentis iom, koncentrante la pensojn, poste

ekparolis per glata voĉo, trankvile, nehaste:

— Multaj malvenkoj de armeoj devenadis de tio, ke la kontraŭulo estis aŭ nesufiĉe esplorita, aŭ, flate al tiu aŭ alia persono, estranta la ŝtaton, prezentita ne en sia vera, reala aspekto. Montri kontraŭulon pli malforta, ol ĝi estas en la realo, subtaksi ties fortojn kaj eblojn — laŭ mi, tio estas krimo antaŭ la krono, pro kiu oni devas radumi...

Grafo Piper facile movetis la brovon, la ĉefleŭtenanto komencis inciti lin.

— Radumi! — trankvile ripetis Des-Fonteines. — Diplomatoj kaj ambasadoroj, povas esti, agas prave, esplorante la sferojn, proksimajn al la kortego kaj plenigante siajn korespondaĵojn per priskriboj de karakteroj kaj malfortaĵoj de tiu aŭ alia grandsinjoro aŭ eĉ monarko, sed ĉu en tio sola estas la afero?

Piper facile klinis la kapon: tio povis signifi kaj tion, ke li konsentas, kaj tion, ke li estas atente aŭskultanta.

— Pasiginte ok jarojn en Rusio kaj ne estante proksima al la kortego, — daŭrigis la ĉefleŭtenanto, — mi dediĉis mian liberan tempon al alio: mi esploradis la landon, karakteron de la loĝantaro, morojn...

— Ĉu morojn?

— Jes, *herre*, morojn kaj karakterojn. Mi esploradis la popolon, kiun ni devas neniigi, por meti tiun vojon al Moskvo, pri kiu vi ĵus diris. Ĉar alian manieron konkeri Rusion ni ne havas. Caro Petro, sendube, estas fenomeno pli ol granda, sed la afero estas ne en li aŭ, pli ĝuste, ne nur en li.

— Tio estas interesa! — prononcis grafo Piper. — Mi petas

vin, daŭrigu...

— Ok jarojn mi vivis en Rusio, ok longajn jarojn. Dufoje mi estis ĉe Azovo, spertis kune kun la rusoj la malvenkon ĉe Narvo kaj estis atestanto de multaj okazaĵoj eksterordinaraj, por ne paroli per tro alta tono. Vi bonvolis mencii la medalon, grafo. Sur ĝi estas montrita ploranta Petro kaj estas elĉizitaj vortoj: «Iris for, ploris amare». Ĉu tiel?

— Jes! — subridis, rememorante la medalon, Piper. — La medalo estis stampita kun sprito. La spado de caro Petro estas ĵetita, la ĉapo falis de la kapo...

— Bedaŭrinde, grafo, la spado ne estas ĵetita. La mizera sprito de la metiisto, stampinta la medalon, estas direktita ne al moko de malvirto, sed al malklarigo de la vero por plezuro de altaj kaj fortaj personoj. Kortegaj poetoj, same kiel farantoj de tiaspecaj medaloj, estas plago por la ŝtato, se ili, dezirante al si favoron kaj profiton, senhonte mensogas kaj flatas al la potenculoj, falsante la veron...

— Ni deflankiĝis de la objekto de nia konversacio, — diris Piper.

— La spado ne estas ĵetita, grafo! — prononcis la ĉefleŭtenanto multesignife. — La mano de la moskvianoj forte kunpremas ties tenilon. Kaj necesas ĉiuj niaj fortoj, tuta sveda sobra prudento, tuta genio de nia popolo, ekstrema streĉo de ĉiuj niaj kapabloj, por kontraŭstari la strebon de Rusio al la maro. La rusianoj opinias tiun strebon justa. Ni staras kiel muro sur la bordoj de la Balta maro. Ili rompos tiun muron, kaj se ni ne obeos la voĉon de racio, Svedio, grafo, ĉesos esti granda regno.

Piper ironie subridis.

— Kion do faru la kompatinda Svedio?

Des-Fonteines kvazaŭ ne rimarkis la sarkasmon.

— La spado estas ĵetita nur sur la medalo, — diris li. — La rusoj ne opinias Narvon definitiva malvenko...

— Partoprenintoj de la batalo en la rusa flanko, gvidataj de duko de Croy, — malvarme interrompis Piper, — rakontis al mi, ke la frakaso estis plena, ke la rusoj fuĝis panike, ke...

La ĉefleŭtenanto subridis.

— Al vundito la batalo ĉiam ŝajnas perdita, — diris li. — Kiel do vidas ĝin perfidulo? Duko de Croy, invitita de la rusoj servi sub la rusa standardo, estas perfidulo, ĉu indas aŭskulti lin? Jam antaŭ la komenco de la batalo la eksterlandaj oficiroj deklaris la batalon malgajnita kaj nur serĉis okazon, por vendi siajn spadojn al lia reĝa moŝto. Forlasitaj de siaj oficiroj, perfiditaj kaj venditaj rusaj soldatoj tamen batalis ĝis la lasta guto de sango, kaj mi neniam forgesos tiun tagon, kiam ili estis forirantaj laŭ ponto trans Narvon, sub tamburado kun malvolvitaj standardoj, sub defendo de la Semenovska kaj Preobraĵenska regimentoj. Kiu vidis tiun malvenkon, tiu ne povas ne pensi pri la estonteco.

— Sed tamen — malvenkon?

Des-Fonteines silente tamburadis per la fingroj al la tablo. Grafo Piper parolis longe. La ĉefleŭtenanto iam kapjesadis — jes, jes, ĉio ĉi, certe, estas vero. Sed en liaj okuloj fiksiĝis obstina malvarma esprimo.

— Ĉu vi tamen malkonsentas kun mi? — malsimpatie

demandis Piper.

— Ĉio ĉi estas vero! — diris Des-Fonteines. — Ili estas en embaraso, estas ankoraŭ impostoj: oni prenas pro foriro en maron kaj pro reveno kun fiŝo, oni prenas pro kverka ĉerko, prenas pro bridoj, pro barboj, pro hakiloj, pro banejoj. Kampulojn oni pelas al superfortaj laboroj; centoj, miloj da homoj mortadas en konstruado de fortresoj, en ŝipkonstruejoj, en metado de vojoj, en ŝnuraj, drapaj, tolaj manufakturoj. Ĉio ĉi estas vero, tamen mi dezirus atentigi vin pri alio. Al mi estas malgaje paroli pri tio, sed tamen mi devas averti vin, ke ŝipoj en Rusio estas konstruataj, kaj ili jam multas, ke en fabrikoj oni gisas kanonojn, kuglegojn, forĝas sabrojn, ankrojn, bajonetojn, ke la bajoneto, kiu nun en Rusio estas enkondukata en infanterio, estas armilo ege oportuna, ĉar ĝi permesas samtempe fari kaj pafadon kaj bajonetan pikadon. Rusaj grenadistoj sukcesas en ĵetado de grenadoj, la ĉevalaj trupoj, armitaj antaŭe nur per lanco kaj sabro, nun estas armataj per mallonga fusilo, per pistoloj kaj rektaj sabroj. La moskvianoj sidigis kanonajn bombardistojn sur ĉevalojn, ili havas bruligajn kaj lumigajn kartoĉojn, ili havas plurtubajn kanonojn, mitrajlon, havas nemalbonajn proprajn rusajn oficirojn. Por kio do, grafo, ni menciu la flatan medalon aŭ kantu la kanton pri la malvenko de la rusoj ĉe Narvo, verkitan de stulta poeto, kiam necesas prepariĝi al ĝismorta batalo kontraŭ la malamiko, kian ankoraŭ ne havis Svedio...

— Vi volis diri... — prononcis Piper.

— Jes, mi volis diri, — konfirmis Des-Fonteines, kaj la grafo aŭdis en lia voĉo kun peno retenatan koleran emocion, — volis diri tion, pri kio nun neniu en Svedio diras: milito kontraŭ

Rusio estas frenezo! Ni povas malestimi tiun ĉi landon, kiel ni malestimadis ĝin ĝis nun, sed en ĉiuj niaj eksteraj esprimoj ni devas serĉi amikecon kun ĝi, fari komercon, montri nin bonaj najbaroj. La rusoj estas forta popolo, pri tio vi povas konvinkiĝi, vidinte tiun galeran bagnulon, kiu nun estas tenata en la fortreso Gripsholm. Parolu kun li. Li transdonadis iujn spionajn leterojn el Stokholmo en Moskvion. Li konas, ne povas ne koni la homon, kiu skribas tiujn leterojn. La arestiton oni torturas jam dum kvara tago kaj ne povas ricevi ion ajn. Jen pri kia kontraŭulo ni devas pensi.

— Ĉu tio estas ĉio, kion vi havis por diri al mi? — demandis grafo Piper.

La ĉefleŭtenanto mallonge suspiris.

— Ĉio, kion mi elaŭskultis de vi, — diris Piper, — estas neseninteresa kiel esprimo de ekstrema opinio de la homo, tro longe troviĝinta en Moskvio, — la grafo akcentis la vorton «tro». — Tamen la sorto de Svedio estas iri laŭ tiu vojo, kiun al ĝi destinis la Providenco...

— La Providencon ni kutimas mencii, kiam ni havas nenion kroman por respondi, grafo. Sed mi supozas, ke multo dependas de la homa volo. La sobra sveda prudento devas suflori la solvon: se ne ekzistas eblo ne militi kontraŭ Rusio, tiam necesas agi tuj. Eĉ ne sekundon de prokrasto! Niaj trupoj fiksiĝis en Polio, dum ĉiu momento donas al la moskvianoj eblon plifortigi siajn armeojn. Komprenu do min: la reĝlando perdos sian povon, se rilatos al Moskvio kun tiu terura facilanimeco, kun kiu estis stampita tiu damnita medalo...

— Ŝajne, por mi sufiĉas aŭskulti vin! — malvarme prononcis grafo Piper. — Nia konversacio daŭras tro longe, kaj

mi ne atendas de ĝi ian ajn utilon...

Des-Fonteines mallevis la kapon. La sola sobra kaj saĝa homo en la ŝtato ne deziris kompreni eĉ vorton el tio, kion li parolis, kaj li ankoraŭ neniam parolis tiel multe, kiel hodiaŭ. Do, ili agu, kiel ili deziras.

Grafo Piper leviĝis. Li estis multe pli malalta ol la ĉefleŭtenanto kaj rigardis al li demalsupre supren.

— En la estonteco mi ne rekomendas al vi fari viajn proprajn konkludojn! — diris li. — Fari konkludojn kaj decidojn povas nur lia reĝa moŝto. Memorfiksu tiun ĉi regulon. Alie vi pagos multe.

La grafo parolis seke, liaj okuloj rigardis malamike.

— Ĉu per la kapo? — demandis Des-Foneines.

Piper silente akompanis la ĉefleŭtenanton al la pordo.

Poste, ludante ŝakojn kun grafo Gyllenstierna, grafo Piper diris, kvazaŭ senintence:

— Margret ne devas plu akcepti tiun agenton en Moskvio, malgraŭ tio, ke ili estis amikoj de la infaneco.

Gyllenstierna respondis, ne deŝirante la rigardon de la ŝaka tabulo:

— Tio okazos per si mem, grafo. Kontraŭ la ĉefleŭtenanto estas komencita enketado. Sed mi ne dezirus ĉagreni Margreton kaj instigi ŝin al plua protektado. Mi uzos ĉiujn fortojn, por ke ŝi nenion sciu pri la sorto de Des-Fonteines. Se cirkonstancoj fariĝos por li tro malbonaj, ni diros al Margret, ke li estas ankoraŭ foje sendita en Moskvion, en Arĥangelskon...

Grafo Piper demetis de la tabulo turon, retenis ĝin sur la polmo.

— Ĉu vi pensas, ke al tiu agento oni rilatos tiom severe?

— Pli ol severe, grafo! — respondis Gyllenstierna. — La reĝa prokuroro estas senkompata al personoj, dubantaj pri saĝeco de lia reĝa moŝto. Kaj li, sendube, pravas. Per ajnaj rimedoj, sed ni devas atingi plenan unuanimecon en la reĝa konsilio.

— Estu tiel! — prononcis Piper.

5. Kia kanto al vi ne plaĉis?

Duope ili sidis ĉe kameno, parolis nelaŭte, preskaŭ flustre: nun en Svedio oni eĉ en la propra hejmo paroladis mallaŭte, timis la murojn. Pendolo — la morto kun falĉilo — kun frapado estis mezuranta tempon. La patro de la ĉefleŭtenanto filtradis tra la dentoj ruĝan italan vinon, paroladis per raŭka voĉo de malnova kavaleriano, rigardante lumon tra la kristalvitra kaliko.

— Al ni ĉiuj oni senĉese diras, ke Rusio, Moskvio estas barbara lando, similaĵo de mongola nomadejo, vasta kampo, kiu atendas sian terkulturiston. Multaj el ni jam nun estas premiitaj per teroj en Moskvio. Lia reĝa moŝto en silento preparas planon de bato en la koron de Rusio — en Moskvon. Estas supozate, ke caro Petro, pri kiu vi rakontis al mi, estos elpelita el sia trono, ke tiun tronon okupos unu el vasaloj de lia reĝa moŝto — aŭ pola nobelo Sobieski, aŭ iu alia el livonianoj aŭ estlandanoj. Pskovo kaj Novgorodo apartenos al ni por eterne, Ukrajnio kaj Smolensko estos favore donitaj al pola nobelo Leszczyński, kiu iĝos reĝo de Polio. La tuta cetera

Rusujo devas iĝi dividita al malgrandaj princlandoj, kiuj per internaj malpacoj tute malfortigas unu la alian. La nordo, certe, post la nuna ekspedicio jam estos apartenanta al ni, kaj ĉio obeos al lia reĝa moŝto, ĉio, kio nur ekzistas sub la arkta ĉielo. Ĉu vi scias pri tio?

La ĉefleŭtenanto silente subridis.

— Lia reĝa moŝto konstante aŭdas pri si, ke li estas mezepoka vikingo, veninta kun sia glavo, por glorigi la hiberboreojn por ĉiam. Oni nomas lin ankaŭ la unua paladino de la vera eklezio, sveda Aleksandro la Makedona kaj per aliaj flataj nomoj. Vi ankoraŭ ne sukcesis ekscii, mia filo, ke en Stokholmo nun ĉiuj legas la maljunan Olof-on Rudbeck-on, kiu verkis libron pri Atlantido. Ĉu vi ne trarigardis tiun verkon?

Des-Fonteines balancis la kapon, diris, verŝante vinon:

— Ne, mi ne legis...

La kolonelo raŭke ekridegis, per fajroprenilo eltiris el la kameno braĝon, bruligis la pipon.

— Svedio estas nomata en ĉi verko la insuloj de sagaoj. Laŭ vortoj de *herre* Rudbeck, la estonteco de la homaro komenciĝos de ĉi tie, de la vikingoj de Svedio. Multaj opinias tiun verkon atentinda kaj parolas pri ĝi same serioze, kiel pri la luterana Biblio... Pli ol tio, nun en la sveda reĝlando oni ne nur ne diskutas agojn de la reĝo, sed oni nomas lin ne alie, ol nia Sigurd, la juna sveda Sigurd. Jen kiel! Kaj la Providenco ĉiam akompanas la junan Sigurd-on, eĉ kiam li entreprenas ajnan evidentan absurdaĵon, tiu kruela sensciulo, kiu elpensis sin mem, komencante de sia longa stulta spado, siaj supermezure grandaj spronoj kaj finante per la simpla manĝo, kiun li

manĝas nepre en ĉeesto de homoj, por ke ĉiuj parolu pri lia sparta vivmaniero. Vi ne scias, mia filo, kio okazas ĉi tie, kaj vi estas nesingarda, vi estas treege nesingarda. Vi forveturis el unu Svedio kaj revenis en la alian...

La kolonelo de kirasuloj estis nemalbona rakontanto, kaj iom post iom Lars Des-Fonteines imagis al si la reganton de Svedio tia, kia li estis reale, neornamita, kun seka kaj unuflanka menso, despote regema, kun furioza memamo. Subridante, la kolonelo priskribis al la filo la scenon de la kronado, kiam Karolo rifuzis akcepti la kronon el la manoj de la klerikaro, deklarinte, ke li akceptos ĝin de neniu, ĉar ĝi apartenas al li laŭ la rajto de naskiĝo. Kunpreminte la dentojn, li elŝiris la kronon disde la kapelpastro kaj mem metis ĝin sur sin — oblikve, malrekte, kaj kiam Piper flustris al la reĝo, ke necesas la kronon reĝustigi, tiam la reĝo tiel insultis per diablo, ke timigis ĉiujn. Sur ĉevalo, ferumita per arĝentaj hufumoj, li veturis el la Riddarholma kirkego, sed la virĉevalo baŭmis, kaj la krono falus sur la pavimon, se ne lerteco de marŝalo Stenbock. Li sukcesis kapti la kronon en la aero.

— Malbona antaŭsigno! — rimarkis la ĉefleŭtenanto.

— Nur al tio ni esperas, — kun subrido diris la kolonelo de kirasuloj. — Sed kiam tio okazos? Li estas plena de planoj, tiu kronita senprudentulo. Li, ekzemple, firme decidis krei union de ĉiuj protestantaj landoj kun si kiel estro. Poste — krucmilitiroj, ĉie enkonduko de protestantismo per forto, kaj, eble, li estos reĝo de la tuta Eŭropo... Kaj se vi povas imagi tion al vi, mia filo, kulmine de la malbonaĵoj li ankoraŭ verkas versojn. Kortegaj kaĵolistoj kun kortuŝeco transdiras la linion: «Pri kio vi malĝojas? Ankoraŭ vivas Di' kaj mi!»...

La kolonelo ekridegis. Lars Des-Fonteines eĉ ne ridetis.

— Mi kaj Dio! — tiel finas tiuj knabaĉoj, — prononcis li morne. — Kompatinda Svedio...

Jam mateniĝis, kiam la ĉefleŭtenanto alligis sian ĉevalon ĉe malalta dometo, tegolita per ardezo, en kvieta strato Skeppsbron. Disportistoj de karbo, vendistoj de biero, laktistinoj en grandegaj kufoj rajde sur azenoj estis moviĝantaj al la urbaj bazaroj. El la haveno estis venanta odoro de algoj, peĉo, tie tondris ankraj ĉenoj, leviĝadis veloj.

La ĉefleŭtenanto frapis al la ŝutro per la tenilo de vipo. Al li malfermis la pordon korpulenta, bonkora dormema Kristina.

— La sinjorino ree atendis vin dum la tuta vespero kaj la tuta nokto! — ekkriis ŝi. — Vi rompas ŝian koron, *herre* ĉefleŭtenanto!

Frapante per la altbotoj, retenante la spadon, li eniris al Karin. Ŝi ne dormis, senmove kuŝis en la lito, ŝia vizaĝo estis pli pala ol ordinare, en la okuloj brilis larmoj.

— Ĉu vi ploras? — miris Des-Fonteines.

Li bruligis la pipon, kriis al Kristina, ke ŝi alportu manĝi kaj drinki. Karin plu estis ploranta.

— Nu, sufiĉas! — diris Des-Fonteines. — M venas al vi ne por vidi, kiel vi ploras. Eble, vi denove havas ŝuldojn? Diru, kaj ni finos tiun aferon...

Ridetante, li komencis malligi la monujon, kiu estis plena de la oro de Margret.

— Vi estas stultulo! — diris Karin kolere, ĉi-foje la oro ne efikis ŝin. — Vi pensas, ke mi bezonas vian monon...

— Ankaŭ monon! — subridis la ĉefleŭtenanto. — Monon bezonas ĉiuj. Ne ekzistas tia homo, kiu neglektus ĝin. Eĉ la reĝo bezonas monon...

— Vi pensas tiel, ĉar vi neniun amas! — kriis Karin. — Vi estas malbona homo, tre malbona homo! Mi ne vidis homon pli malbonan ol vi. Ne vane mia Kristina nomas vin lupo. Kaj vere, vi similas lupon.

Per la fortaj makzeloj Des-Fonteines estis rapide maĉanta varmegan, pipritan, rostitan viandon.

— Ĉu vere? — demandis li indiferente. — Lupon? Antaŭe vi al mi ne diris tion, etulino! Vi nomadis min — mia birdido, jes, jes, mi tion bone memoras. Kaj kio koncernas mian amon, do mi ja pri ĝi al vi ne diris, kaj al ni estis nemalbone, ĉu vere? Ni simple petoladis, amuziĝadis kaj ne malŝparis vane vortojn...

Ŝi eksidis en la lito, la nokta kufo ŝoviĝis flanken, la haroj disŝutiĝis sur la ŝultroj. Per io ŝi rememorigis al li Margret-on — eble, per la koloro de la haroj kaj per la subtila vangruĝo?

— Do bone! — ekkriis Karin. — Mi rigardos, kiel vi petolos kaj amuziĝos, kiam ekscios tion, kion scias mi...

Des-Fonteines turniĝis al ŝi, deflankigis la teleron.

— Kion vi faris tie, stultulo, en la interkruciĝo de tri vojoj? Ĉu vi mortigis oficiron? Pro kio? Ĉu al vi ne plaĉis kanto?

— Mi nenion komprenas...

— Ne komprenas? Diru, kia kanto al vi ne plaĉis?

Ŝi mallevis la nudajn piedojn de la lito, aliris lin, retenante la ĉemizon sur la brusto, ekparolis per tremantaj lipoj:

— Hieraŭ al mi venis pastro de la reĝa kapelpastro Nordberg. La korpo de la mortigito estis trovita. La oficiroj ĵuris sur la Biblio, ke al vi ne plaĉis kanto, ili nur ne memoras — kia estis kanto... La enketadon faras la reĝa kapelpastro mem, la aferoj pri dueloj estas komisiitaj al li. Nun ili deziras scii, kia estis la kanto.

— Stulta kanto pri la Narva batalo! — diris la ĉefleŭtenanto. — Sed, mi pensas, ili ne devus scii pri tio. Stultaĵo! Se la oficiroj estis tiom ebriaj, ke ne memoras la kaŭzon de la duelo, la kapelpastro neniam ekscios, de kio komenciĝis la afero...

Kaj li ekridis per obtuza rido, kvazaŭ ekbojis. Karin tremeris, fermis la okulojn: Lars Des-Fonteines neniam scipovis ridi.

— Vanaj timoj, knabino! — diris li. — Sed vi bone faris, ke avertis min. Nun mi scias, kion ili de mi bezonas... Kuŝiĝu kaj viŝu la okuletojn. Al vi tute ne alaspektas, kiam vi ploras. Vi devas esti ĉiam gaja.

Dum dormo li kriis: li sonĝis la rusan fuĝinton, pendumitan sur la galera jardo. Longaj vicoj de pendumiloj ĉirkaŭis lin...

6. La reĝa kapelpastro

Ĉe pordo de kabineto de la reĝa kapelpastro staris du subleŭtenantoj en kaskoj kaj malpezaj kirasoj, kun manoj, kunmetitaj sur la teniloj de la glavoj. Ĉe la vido de la maljuna kirasula kolonelo kun la filo ili prezentis la glavojn kaj ree rigidiĝis kvazaŭ statuoj — grandegaj kaj senmovaj.

Kortega lakeo malfermis antaŭ la kolonelo kaj la ĉefleŭtenanto pezajn pordojn.

La kapelpastro Nordberg — la konfesprenanto de la reĝo kaj la unua karolano de Svedio, kiel oni nomadis lin en la kortego, — estis senmove rigardanta al la enirintoj. Alta, kun furioze briletantaj okuloj, kun akraj moviĝoj, li pli similis al frenezulo, ol al la unua kleriko en la ŝtato. Pri li oni diradis, ke li imitas la nekredeblan episkopon Hemming-on Gadh-on, ĝuste tiun, kiu, gvidante sieĝon de la Kalmara kastelo, per glavo finmortigadis vunditajn danojn kaj sentime batalis kun arbalesto en la manoj — ne malpli bone ol ajna dungosoldato. Same, kiel Hemming Gadh, la kapelpastro Nordberg uzadis eklezian lingvaĵon nur tiam, kiam «je la nomo de krucumita pro ni Kristo» li postuladis senesceptan neniigon de kaptitoj, aŭ komencon de nova milito, aŭ vican reprezalion kontraŭ katolikoj, ortodokskristanoj, islamanoj... Pri supermezura krueleco kaj sangavideco de Nordberg cirkuladis legendoj eĉ ĉe la kortego de Karolo, kie molkorecon neniu opiniis virto.

— Ĉu vi venis el Moskvio? — demandis la kapelpastro la ĉefleŭtenanton.

— Jes, el Moskvio.

Ĉe la kapelpastro estis tikanta la buŝo. Li alpremis la vangon per la polmo — la buŝo ĉesis tiki. Liaj okuloj rigardis penetre.

— Kion ili diras pri la malvenko ĉe Narvo?

— La rusoj ne tro ofte rememoras la malvenkon ĉe Narvo, — respondis Des-Fonteines. — Ili pli emas konversacii pri siaj venkoj ĉe Azovo...

La kapelpastro ridetis.

— Jen kial al vi tiel malplaĉis la kanto pri Narvo...

La vizaĝo de la ĉefleŭtenanto malrapide flaviĝis. La

kolonelo kun maltrankvilo rigardis jen al la filo, jen al la kapelpastro.

— Vi mortigis plej indan oficiron, — estis parolanta la kapelpastro, — kaj pro kio? Ĉu pro tio, ke li en la kanto esprimis sentojn, brulintajn en lia brusto! Filozofo, predikanta malutilajn por la krono ideojn, poltrono, ne kuraĝinta eĉ akiri necesan por la krono desegnaĵon de la Novdvina fortreso, malestiminda laŭdanto de la moskvianoj murdas kuraĝan oficiron, uzinte ties nescipovon batali per spadoj...

Des-Fonteines silentis, mallevinte la kapon, ne aŭskultante la kapelpastron. Kiu perfidis lin?.. Kaj subite sango alfluis lian vizaĝon: Karin — jen kiu! La damnita inaĉo ĉiam opiniis sin bona luteranino.

— Marteno Lutero instruas nin pri tio, ke la homo estas ne pli ol ŝarĝobesto, — estis parolanta Nordberg. — Tiu ŝarĝobesto povas esti selita kaj de Dio kaj de la Diablo. Vin selis la Diablo. Preĝu! Kio vi estas en la Providenco? Hodiaŭ vin aŭskultos lia reĝa moŝto. Vi ankoraŭ povas mildigi vian sorton, se faros paroladon, indan je tiu, al kiu ĝi estos direktita... Iru!

Kaj, turninte sin al la maljuna kolonelo, Nordberg aldonis:

— Mi kore kompatas vin, *herre* Des-Fonteines. Sed kion eblas fari? Preĝu!

Ĉapitro kvara

Ni ĉiuj ĉe la temp' kaj tim' bufonas.
La aŭtoro

1. Reĝo Karolo XII

La parolado estis trapensita eĉ en etaj detaloj, sed nun Lars Des-Fonteines decidis paroli alie. Estis minutoj, kiam li rezignaciis, sed nun, kiam tuta lia estonteco, kaj eble, eĉ la vivo mem, estis metita sur karton, la ĉefleŭtenanto ne plu dubis pri tio, kiel li devas agi. Ne povas esti, rezonis li, ke en la ŝtata konsilio de la sveda reĝlando ne troviĝus sobraj kapoj, ne povas esti, ke la reĝo mem de la svedoj, vandaloj kaj gotoj, la juna Sigurd, ne elaŭdu la voĉon de racio. Necesas teni sin kuraĝe kaj sendependе. Reĝo Karolo, kion ajn oni diru pri li, estas kuraĝa, li aprezos kuraĝon. Kaj, povas esti, aŭskultinte sian ĉefleŭtenanton, li forpelos flatantojn, profanojn kaj militistojn, similajn al duko de Croy, kaj ordonos al Lars Des-Fonteines okupi indan je sia saĝo kaj sagaco postenon en la reĝlando...

Antaŭ ol veturi al la palaco, li kun la patro trinkis po kruĉeto da holanda flino — varmigita biero kun konjako kaj kajena pipro. Nun ili ambaŭ trankviliĝis kaj ĉesis timi la estontecon. La ĉefleŭtenanto parolis dum la vojo:

— Mi dum multaj jaroj ĉiuhore riskadis la vivon, do kiu dubos pri mia fideleco al la krono? La reĝo ne povas ne elaŭskulti min. Li, certe, havas ardan kapon, sed ĝi malvarmiĝos pro mia parolado. Kuraĝo en opinio — jen tiu

atuto, per kiu mi ludos. Kiu konas Moskvion pli bone ol mi? Kiu kontraŭdiros al mi? Kiu prezentos pruvojn pli raciajn ol la miaj? Ĉu kortegaj kaĵolistoj kaj flatistoj? Flatado koruptas mondpotenculojn en maljuneco, en juneco la animo ne estas sentema al ĝi... Mian paroladon la reĝo ne povos ne aprezi, mi diros ĝin sufiĉe konvinke, kaj kiam miajn pensojn konfirmos la vivo, la vojo por mi estos malfermita. Estas malbona tiu ludanto, kiu neniam riskas ĉion, kion li havas. Mi kutimiĝis riski...

La kirasula kolonelo ĵetis oblikvan rigardon al la filo.

— Vi ankoraŭ estas juna, Lars, — diris li. — En Svedio nun neniu riskas ion ajn. Tro timinda estas risko en nia bona reĝlando... Tamen, eble, vi pravas. Ĉe la kortego leviĝoj kaj faloj estas tute neklarigeblaj. Kiu scias, kio povas plaĉi al la kaprica knabaĉo? Kiu scias, kio povas furiozigi lin? Ĉiuokaze, mi petas vin pri tio, estu treege singarda, atente observu la impreson, kiun faros viaj vortoj, kaj, okaze de neceso, abrupte ŝanĝu la kurson...

En atendo de komenco de la kunsido de la konsilio ili estis promenantaj en la palaco, tra haloj kaj galerioj, konversaciis nelaŭte, ridetadis, por ke ĉiuj vidu — ili estas afliktitaj de nenio, ĉio estas bona en ilia vivo. Trans la fenestroj de la palaco bruis maljunaj arboj de la parko, ankoraŭ nudaj, sed kun ŝvelintaj burĝonoj. La kolonelo, lamante — doloris malnovaj vundoj, — parolis, mallaŭte subridante, kvazaŭ estis rakontanta monduman amuzan novaĵon:

— Ĉiuj kunvenis, sed la reĝo ankoraŭ ne estas. La reĝo amuziĝas aŭ per printempa ĉasado, aŭ ekzercas siajn fortojn en tio, ke hakas kapojn al ŝafoj kaj bovidoj. La konsilio plej

humile atendas. La ĉefa okupiĝo de la konsilio estas atendado. Ĉe ni oni kutimas pensi, ke la reĝo estas akurata, — li sugestis tiun opinion per tio, ke li ne toleras, kiam malfruas eĉ la plej senvalora oficisto...

Kapmontrinte marmoran Dionizon, starantan en galerio kontraŭ fenestro, la kolonelo kun la sama senĝena vizaĝesprimo duonflustre klarigis:

— Ni fieras pri tio, ke ĉi tie ĉio estas rabakirita. Estas sciate, ke tiun ĉi Dionizon oni longe ne povis lavi ĝispure, tiom multe da sango estis sur ĝi. Kiam generalo Königsmarck atakis tiun parton de Prago, kiu kuŝas trans rivero Vultavo, la ĉeĥoj kun leona kuraĝo komencis defendi sian kastelon Hrad-on kaj tiujn ĉi skulptaĵojn — la fieron de la lando. Korpoj de kvar herooj estis disŝiritaj de la rabantoj apud tiu ĉi Dionizo. Kaj por elŝiri de la ĉeĥoj arĝentan gotan Biblion, necesis forhaki per sabro la manojn de la bibliotekisto. Jen laŭroj, kiuj malhelpas dormi al multaj flatantoj de lia reĝa moŝto...

Susurante per la sutano, fingrumante rozarion, klininte la kapon, preter ili rapide trairis en la halon de la konsilio kapelpastro Nordberg. Lia vango estis tikanta, la mallevitaj okuloj flagris. Dragonoj malfermis antaŭ la kapelpastro duklapan pordon, generaloj leviĝis renkonten al li.

— La maljuna vulpo scias, ke la reĝo estas proksime! — diris la kolonelo.

Vere, ĝuste en tiu ĉi tempo supre sur la turo longe ekkantis klariono: la palaca gvatanto ekvidis la reĝon.

Dragonoj ĉe la ŝtuparo levis trumpetojn, ludis mallonge: «La reĝo venas al ni!» Subleŭtenantoj levis glavojn por saluti

la reĝon. Kirasuloj demetis mallongajn lancojn — por prezento. La klariono sur la turo ekkantis ree. Kortega adjutanto, tondrante per la spronoj, retenante la spadon, ekkuris malsupren — renkonti. En la granda halo de kavaliroj, en la galerio, en la akceptejo ministroj, generaloj, admiraloj, oficiroj, altrangaj oficistoj ĉesis interflustri, turniĝis al la ŝtuparo kun respektemaj vizaĝoj. Kortegaj damoj rigidiĝis en profunda riverenco. Neniu ridetis, — Karolo malamis gajon, pensis, ke oni ridas pri li.

Estiĝis tia silento, ke ĉiuj ekaŭdis bruon de vento, — sur la maro estis komenciĝanta ŝtormo.

Ankoraŭfoje ekkantis la trumpetoj, kaj sur la sojlo de la granda halo aperis la reĝo.

Post li defilis nur unu homo — Axel Sparre, la reĝa prokuroro, amiko de Nordberg kaj estonta estro de Moskvo, kiel pri li parolis homoj, proksimaj al la kortego.

Karolo iris rapide, tirante la longan karnan nazon kaj pri io kolerante. Lia knabeca, sed jam ŝvela vizaĝo, ruĝaj okuloj, mallarĝaj lipoj — ĉio estis esprimanta malkontenton. Per la piedo en brilanta altboto li batis trafintan sur la vojon gajan hundeton, kolere strabis al generalo Lewenhaupt, elmetis antaŭen la maldikan ŝultron kaj, respondinte al nenies riverencoj, eniris en la halon de la konsilio. La malpeza pordo fermiĝis. La dragonoj rigidiĝis, kunmetinte la manojn sur la teniloj de la glavoj.

— Nu? — flustre demandis la kolonelo la filon. — Ĉu al vi plu ŝajnas, ke li kapablas elaŭskulti la veron kaj aprezi ĝin?

La ĉefleŭtenanto levis la ŝultrojn.

— Li tuta estas mensogo. Tian amplekson de spado havas nur unu homo en la mondo. Spronoj de tia grandeco estas nur ĉe nia reĝo. Kaj piedingoj? Vi ne vidis nian reganton en selo...

Li ree trairis la galerion, la kolonelo, retenante sin, estis parolanta:

— Komenci reĝi en dekkvinjara aĝo estas ne tiom facile. Knaba kaprico iĝas leĝo, nedeziro lerni — braveco. Krom la luterana Biblio kaj unu, nur unu kavalirromano, li nenion legis kaj ne legos. Ĉiuj ĉirkaŭe senĉese flustras al li pri tio, kiel li estas granda kaj kiaj pigmeoj estas ĉiuj estintaj antaŭ li mondpotenculoj. Eble, li ne ĝisfine fidas la flatistojn, sed tamen kial ne iri konkeri Moskvon? Jen, cetere, liaj ĉefaj konsilantoj pri la aferoj de Rusio. Lia reĝa moŝto tute fidas tiujn sinjorojn.

Des-Fonteines levis mornan rigardon.

Renkonten sub gvido de iom perdinta koloron, sed plu brilanta duko de Croy per bunta amaso iris generaloj kaj eksterlandaj oficiroj, fordonintaj ĉe Narvo siajn spadojn al la reĝo de Svedio. En plumoj kaj manteloj, en svedaj kaj skotaj uniformoj, brilante per kudraĵoj kaj dekoracioj, retenante per la manoj sabrojn, sub melodia tintado de spronoj, ili estis gaje kaj fiere irantaj sur palacaj pargetoj kaj tapiŝoj en la halon de la konsilio de lia moŝto reĝo Karolo XII.

Fermis la procesion triopo: kolonelo Blomberg, Gallart kaj kolonelo James el la urbo Arĥangelsko, lasinta sian postenon kvazaŭ por batali sub standardoj de Petro, kaj farinta sian karieron en la sveda armeo per tio, ke en la Narva batalo, dum la fama neĝa blizardo, li la unua trovis la reĝon kaj al li, Karolo XII, malleviĝinte sur unu genuon, per tenilo antaŭen fordonis

sian spadon, dirinte ĉe tio:

— Al la plej granda el la militestroj de ties fidela sklavo!

Silente, per peza rigardo Lars Des-Fonteines akompanis la procesion, kaj lia koro por momento kunpremiĝis pro malbona antaŭsento.

— Eble, ni devas foriri de ĉi tie? — flustre demandis la kirasula kolonelo. — Foriri kaj malaperi? Ni dungiĝos servi al iu princeto aŭ reĝo kaj servos ĝuste je tiom da taleroj, kiom oni pagos al ni...

— Mizera estonteco! — ne tuj respondis la ĉefleŭtenanto. — Ĉu vere por tio mi tiom da jaroj pasigis en Moskvio?

La kolonelo mallevis la kapon.

— Ĉefleŭtenanto *herre* Des-Fonteines! — laŭte prononcis la deĵoranta kortega adjutanto. — Eniru en la halon!

La dragonoj malfermis la pordon.

Karolo sidis en la centro de la konsilia halo ĉe malgranda tableto, kovrita per drapo. Maldekstre kaj dekstre de li brulis kandeloj en pezaj arĝentaj kandelingoj. Lia vizaĝo estis esprimanta malplezuron kaj enuon. Al li tedis babiluloj. Li mem estis silentema ne tial, ke tia li naskiĝis, sed tial, ke iam li decidis esti silentema kaj ekde tiam li uzadis nur kelkajn vortojn, tiajn, kiel: «jes» aŭ «ne», «komenci» aŭ «atendi», «regali» aŭ «pendumi», «donu manĝi», «mi ne deziras!». Tiuj vortoj estis tute sufiĉaj por li.

Kunsidoj de la ŝtata konsilio incitadis la reĝon. Ĉu vere ili pensas, ke li bezonas iliajn opiniojn? Kaj kiel komprenigi ilin, ke nur tiuj, kiuj silentas kaj plenumas liajn dezirojn, necesas al

Dio, la reĝo kaj la ŝtato.

Levinte la pezan kapon, li ekrigardis al rufa admiralo Wattrang kaj, farinte atentajn okulojn, kapjesis, kvazaŭ konsentante kun la galimatio, kiun estis diranta la maljunulo. Wattrang, sentante sin flatita, patose etendis la manon al la reĝo kaj ekkriis:

— Kaj tiam kun Dia favoro bonaj svedaj ĉevaloj penetros la rusiajn stepojn kaj la standardo de la reĝo estos levita super Kremlo. Gloron al la reĝo!

Karolo larĝe oscedis al la vizaĝo de la perpleksa admiralo. Piper forturniĝis, kaŝante rideton. La reĝo oscedis longe, sur la okuloj aperis larmoj. Poste li kliniĝis al sia ĉambelano grafo Wrede kaj ordonis:

— Alportu al mi manĝon, alie mi ekdormos.

Tio estis tre longa frazo por la reĝo. Wrede, fleksiĝinte, malaperis el la konsilia halo. Nun estis parolanta generalo Lagercrona — korpulenta maljunulo kun tondra baso. El lia buŝo elflugadis salivo, kiam li prononcadis frazojn pri tio, ke Rusio pretas al malvenko kaj ke meti finon al Aŭgusto de Polio estas multe pli honora tasko, ol militi kontraŭ la moskvianoj, kiuj nun ne povas rezisti. Post Lagercrona leviĝis barono Schlippenbach. Disĵetinte per la polmo la pompajn lipharojn, misformante la vizaĝon pro malnova kontuzo, li en akraj esprimoj insultis kaj Stackelberg-on kaj Rehnskiöld-on, parolintaj antaŭ li, kaj diris, ke militi kontraŭ Rusio endas senprokraste, kaj kio koncernas Aŭguston, do por venki lin ĉiam sufiĉos tempo...

La reĝo ree oscedis.

Post la barono per langvora voĉo ekparolis duko de Croy. En bombastaj esprimoj li mallaŭdis la rusajn soldatojn, subtile mokadis iliajn batalajn kvalitojn. En la halo oni subridadis. La duko estis opiniata spritulo.

— Tamen post kiam vi, duko, kaj aliaj generaloj forlasis la rusajn trupojn, la preobraĵenskanoj kaj semenovskanoj batalis tiom kuraĝe, ke eĉ lia moŝto reĝo esprimis aprobon al ili! — aŭdiĝis trankvila kaj malvarma voĉo el profundo de la halo.

Karolo turnis la longan kapon: fone de arĝentkolora kurteno staris homo en uniformo de flota ĉefleŭtenanto.

La duko levis la tenilhavajn okulvitrojn, serĉis per rigardo la arogantulon, ŝajnigis, ke ne trovis, kaj ekparolis ree. Sed jam neniu plu ridis pri liaj spritaĵoj. Probable tio okazis tial, ke la reĝo ĉesis rimarki lin.

Post la duko unu post alia paroladis generaloj, kiuj servis al la rusoj. Laŭ ilia opinio, eĉ ĝeni la reĝon per tiom eta temo ne havis sencon. Kaj kolonelo James, dum multaj jaroj servinta en Arĥangelsko kaj eĉ scianta kelkajn rusajn proverbojn, konklude de sia parolado petis unu korpuson de svedoj por faro de decida bato en la koron de Rusio, al Moskvo.

Tio al la reĝo ne plaĉis: se estas tiom simple konkeri Moskvon, tial por kio li, Karolo, donis al la moskvianoj paŭzon post la Narvo?

— Stulta! — diris la reĝo al grafo Piper, sed tiel laŭte, ke aŭdis multaj.

La grafo klinis la kapon signe de plenega konsento.

La reĝo vidate de ĉiuj manĝis sian soldatan vespermanĝon: sekan flanon kaj pizan kaĉon kun milea grio. En vitra kruĉo

estis donita akvo — ĉiuj vidis, ke la reĝo trinkas akvon. Li laŭte, soldatmaniere ŝmacadis kaj viŝadis la buŝon per tola tuko. «Neniajn teneraĵojn!» — ŝatis diri Karolo XII.

— Kiu staras tie, apud la kurteno? — demandis li, trinkinte akvon post sia vespermanĝo. — Tiu, kiu rememoris Narvon?

— Ĉefleŭtenanto de floto kaj nia eksa agento en Moskvo, — respondis Piper sen ajna esprimo en la voĉo.

— Ĉu tiu, kiu duelis per spadoj?

— Tute ĝuste, via reĝa moŝto...

Karolo ŝatis mirigi per sia memoro proksimulojn kaj ŝatis, ke pri tio oni miru laŭte.

— Mirinde! — prononcis grafo Piper per drameca flustro, kliniĝinte al la najbaro.

— Li parolu! — ordonis Karolo, kapmontrinte en la direkto de la kurteno.

Li apogis la mentonon per la polmoj kaj ekrigardis al la oficiro per ruĝaj pikantaj okuloj.

La ĉefleŭtenanto ekparolis per mallongaj, precizaj frazoj, kaj Karolo subite eksentis, ke ĉio en tiu oficiro estas malagrabla kaj malamika al li: malagrablas la malmilda voĉo, la sendependa kaj senmova rigardo de la koncentritaj okuloj, malagrablas la pensoj, kiujn estis eldiranta la oficiro. Kaj, por ke li tion sentu, Karolo sulkis kun abomeno sian ŝvelintan vizaĝon kaj kun distriteco en la rigardo forturniĝis al Piper, kiu scipovis momente kompreni la reĝon.

— Li estas ankoraŭ juna, por instrui la konsilion! — diris grafo Piper.

— Li simple estas impertinenta! — respondis Karolo tiel laŭte, ke multaj en la konsilio aŭdis tiujn vortojn kaj komencis transdoni al tiuj, kiuj sidis malproksime de la reĝo.

Sed la ĉefleŭtenanto sentis nenion. Li daŭrigis nomadi tipojn de kanonoj, kiuj estis gisataj en rusaj fabrikoj, rakontadis pri ŝipoj, kiuj eliris en la Azovan maron kaj fortranĉis la turkojn de ties fortresoj, koncize raportis pri la Novdvina citadelo kiel pri obstaklo sur la vojo al la urbo Arĥangelsko...

— Kie do estas desegnaĵo de la fortreso? — demandis de sur sia loko grafo Gyllenstierna. — Kial ni ne havas la desegnaĵon?

Kaj la reĝo ripetis:

— Kie estas la desegnaĵo?

Lars Des-Fonteines entiris la kapon en la larĝajn ŝultrojn. Li komprenis: oni decidis lin ĉasakiri je ajna kosto. Kaj li komencis montri la dentojn kiel lupo, super kiu jam estas levitaj lancoj de ĉasistoj. La desegnaĵo? La moskvianoj iĝis multe pli singardaj kun fremdlandanoj, ol en la antaŭaj tempoj...

— Sed caro Petro protektas fremdlandanojn! — diris Axel Sparre. — Kial vi ne povis uzi tiun protektadon por utilo de la krono?

— Caro Petro nun estas pli singarda kun la fremduloj, ol en la tagoj de sia juneco, — respondis la ĉefleŭtenanto. — La fremduloj, necesas diri juste, faris ĉion, kion povis, por perdi la protektadon de la rusa caro. Narvo estis por la moskvianoj bona leciono, kaj ĉeestanta ĉi tie duko de Croy — bonega instruisto. «Ĉiuj ili estas perfiduloj», — tiel pensas ajna soldato

en Rusio pri fremdlandanoj, kaj en tio per nenio eblas helpi. Pli ol tio, la rusoj nun havas siajn agentojn en Stokholmo: ĉiu paŝo de la preparata ekspedicio al Arĥangelsko estas de ili bone sciata. Kaj ni ĉi tie, bedaŭrinde, estas tute senhelpaj. Ni ne povas kapti iun ajn ĉe la freŝa faro...

Karolo turniĝis al Axel Sparre:

— Ĉu agentoj de moskvianoj en Stokholmo?

La reĝa prokuroro respondis flustre:

— La enketado estas farata, via reĝa moŝto...

— Agentoj de moskvianoj faras ĉi tie ĉion, kion ili deziras! — daŭrigis Lars Des-Fonteines. — Ili estas multaj kaj nekapteblaj. Eĉ la reĝa prokuroro *herre* Axel Sparre ne kaptis almenaŭ unu grandan agenton...

— Pri tio oni ne parolas laŭte! — ekkriis Sparre.

— Ĝuste tial, ke neniu estas kaptita kaj ne estos kaptita, — diris la ĉefleŭtenanto. — Ni ŝatas fanfaroni, sed malamas serĉi kaŭzojn de niaj malvenkoj...

Malklara rumoro traflugis la halon de la konsilio. Axel Sparre kliniĝis al grafo Piper kaj flustris:

— Ĉu al vi ne ŝajnas, grafo, ke al tiu ulo tempas meti finon? Ankoraŭ nemulte — kaj lia reĝa moŝto interesiĝos pri li...

Grafo Piper demandis laŭte:

— Al ni ne estas klara via penso, *herre* ĉefleŭtenanto. Vi timas militon kontraŭ la moskvianoj kaj pro tiu timo bildigas la rusojn gigantoj, kaj la svedojn pigmeoj? Ĉu tiel?

— Li estas aĉetita de la moskvianoj! — kriis Axel Sparre.

— Ni aŭskultas en la konsilio ne voĉon de sveda oficiro, sed voĉon de rusa oro...

— Mi nenion timas! — per trankvila voĉo respondis Lars Des-Fonteines. — Mi ne estas subaĉetita, ne! Saĝo de lia moŝto reĝo de la svedoj estas garantio de tio, ke la milito kontraŭ la moskvianoj finfine alportos venkon al la sveda armeo. Mi petas nur memori, ke Moskvio estas ne tia mizera lando, kia ĝin prezentas ĉi tie duko de Croy, kolonelo James kaj reĝa prokuroro Sparre. Kruelaj elprovoj — jen kio atendas la reĝlandon. Al tio devas esti pretaj ĉiuj...

Lin oni ne plu aŭskultis. En la halo staris bruo. Li estis finita homo kaj komprenis tion. Obtuza indiferenteco ekregis lin. Li tro laciĝis dum la lastaj tagoj... Ŝajne la patro estis prava: certe, li devus fuĝi, kaŝiĝi, malaperi. Sed nun ĉio estis malfrua...

Post la ĉefleŭtenanto parolis generalo-kvartirmastro Gyllenkrok. La reĝo aŭskultis lin distrite kaj kapjesis nur unufoje, kiam Gyllenkrok nomis la paroladon de la ĉefleŭtenanto babilado de homo kun malpura konscienco. La maljuna barono Schlippenbach subridis. Grasa Lewenhaupt parolis la lasta. «Malpli da malkuraĝuloj en nia armeo!» — diris li, eksidante.

Al la reĝo en la estiĝinta silento kliniĝis kapelpastro Nordberg kaj Axel Sparre. Li elaŭskultis ilin atente, balancis la longan kapon kaj leviĝis.

— Nia decido, — diris li per sia alta grakanta voĉo, — nia decido estos farita konforme al la opinioj, kiujn esprimis la konsilio. La milito kontraŭ la moskvianoj estas neevitebla. Kaj ni esperas, sinjoroj, ke Dio benos nian sanktan aferon.

— *Med Guds hjälp*! — respondis la konsilio. — Kun Dia helpo!

Reĝaj trabantoj malfermis la pordoklapojn. Kirasuloj, grenadistoj kaj subleŭtenantoj prezentis la armilojn. Longe fanfaris trumpetoj. Per pezaj paŝoj Karolo malleviĝis laŭ la ŝtuparo kaj en lumo de peĉaj torĉoj, fulgantaj sub vento, eksidis sur sian ardan malhelbrunan virĉevalon.

Ankoraŭ ne ĉesis frapado de hufferoj de la reĝa kavalkado, kiam apud la krado de la palaca parko kvin trabantoj de la servo de Axel Sparre haltigis la kolonelon kaj lian filon. La ĉefleŭtenanto deĉevaliĝis. Kapitano de la trabantoj postulis de li la spadon. Lars Des-Fonteines prokrastis. La ĉevaloj prancis ĉirkaŭ li, la kapitano strečis la ĉanon de sia pistolo.

— Prenu! — diris Des-Fonteines.

Forlasantaj la palacon generaloj kaj ministroj vidis, kiel surĉevalaj trabantoj kondukis Lars-on Des-Fonteines-on en la kancelarion de Axel Sparre.

La ĉefleŭtenanto iris malrapide, liaj manoj estis katenitaj, la kapo estis malalte mallevita. La aresto antaŭ la okuloj de la konsilio estis bona leciono por ĉiuj malkvietaj homoj en la reĝlando sveda. Por la konsilianoj estis ankaŭ utile vidi la maljunan kirasulan kolonelon kvazaŭ ŝtoniĝinta apud la ferkovrita pordo de la kancelario de la reĝa prokuroro.

2. Oni juĝos lin ne tro severe

Grafo Gyllenstierna estis leganta mapon en lumo de kandeloj en sia kabineto kaj per malgrandaj glutoj trinkanta sukerakvon, kiam li aŭdis paŝojn de Margret. Li estis sen

peruko, kalva, en varma pelta kamizolo, en turkaj marokenaj ŝuoj kun fleksitaj bekoj. Margret iris rapide, preskaŭ kuris; li komprenis tion laŭ tio, kiel ŝi anhelis, malleviĝante en fotelon ĉe la kameno.

— Bonan vesperon! — diris ŝi, restarigante la spiradon.

— Bonan vesperon, Margret! — respondis li, volvante la mapon. Strabe, per rapida rigardo li notis palecon de ŝia vizaĝo, la lacan pozon kaj komprenis: ŝi scias ĉion. Do bone, ŝi sciu. Nun ili estas kvitaj. Li estas venĝita, lia honoro estas restarigita. Certe, li devus mortpiki la ĉefleŭtenanton en duelo, sed la sorto decidis alie. Laŭ volo de la Providenco la reĝa prokuroro Axel Sparre metos finon al tiu ĉi afero por ĉiam...

— Mi aŭskultas vin, Margret! — diris li, eksidante en fotelon kontraŭ ŝi.

Ŝi silente rigardis al li. «Kalva diablo» — nomadis lin matrosoj. Pri li oni rakontadis, ke li jam en la juneco vendis la animon al diablo. Tiu homo neniam sciis mizerikordon. Nek mizerikordon, nek kompaton.

— Mi aŭskultas vin, Margret! — ripetis li.

— Kia malvarma kaj humida vespero, — prononcis ŝi, kuntiriĝante. — Estas tre malvarme, ĉu ne?

— Mi ne trovas tion...

— Certe, vi ne trovas... Vi estas maristo... vi kutimiĝis al humideco kaj malvarmo. Tuta via vivo pasis en maro...

Kaj ŝi tusis.

— Ĉu vi havas malvarmumon?

— Eble iomete...

Krakinte per la fingroj, ŝi diris kun devigita rideto:

— Vi afliktis vian edzinon, Erik. Ĉu Lars Des-Fonteines estas tamen arestita?

Gyllenstierna rigardis al Margret per senmovaj okuloj:

— Ĉu vere?

Li vidis, kiel ektremis ŝia mentono, sed ŝi trovis en si fortojn reteni sin.

— Imagu, Margret, mi nenion scias pri tio.

— Murdo dum duelo! — ekkriis ŝi. — Kia absurdaĵo! Ĉu ne eblas protekti homon, kiu tiel utilas al la krono?

La grafo silentis.

— Per kio ĉio ĉi minacas al li? — singarde demandis Margret.

— Per ne tre multo.

— Per kio do?

Gyllenstierna diris, ke, tre probable, la oficiro estos juĝita, sed apenaŭ tro severe. Oni sendos lin en Polion kiel agenton, aŭ en Moskvion, se tio estos ebla, aŭ en Danion.

— Mi kompatas lin, — facile oscedinte, diris Margret. — Kaj kompatas lian maljunan patron. Maljunuloj ĉiam estas kompatindaj.

— Lia patro estas pli juna ol mi je tri jaroj! — respondis grafo Gyllenstierna. — Vi devus forgesi tiun ĉi temon...

— Mi kompatas ankaŭ vin, — movinte la ŝultrojn, subridis Margret, — speciale kiam vi estas sen peruko. Peruko tamen beligas vin...

Gyllenstierna silentis.

— Sed iam vi longe rakontadis al mi pri via pasinteco... Pri diversaj maroj kaj varmaj landoj, pri aborigenoj kaj pri sangaj bataloj. Nun vi ĉiam estas okupita, kaj ni vivas tiel enue. Tagoj similas unu la alian...

Li aŭskultis kun singardeco: Margret estas ruza, nun ŝi ion postulos.

— Mi simple velkos pro angoro. Promesu, se vi iros en maron, preni min kun vi?

— Mi estas milita maristo, — respondis Gyllenstierna. — Al mi estas subordigitaj militaj ŝipoj. Kaj sur milita ŝipo por virino ne estas loko.

— Ĉu por mi ne estas loko?

— Margret, neniu virino...

— Edzino de admiralo kaj filino de ŝtatsekretario povas iri ankaŭ sur milita ŝipo! — respondis Margret. — Kaj se vi ne deziros preni min kun vi, tiam mi petos la patron, kaj li al vi tutsimple ordonos. Ĉu vi komprenas? Mi havas rajton pri iuj kapricoj, vi tion bonege komprenas...

Kaj, abrupte leviĝinte, ŝi foriris el lia kabineto al si.

3. Ekzekuto

Reĝa prokuroro Axel Sparre kune kun prizona kapelpastro vizitis Des-Fonteines-on en lia mallibereco en la kastelo Gripsholm en la sekva nokto. Du provosoj estis akompanantaj la kapelpastron kaj la prokuroron. Flamo de torĉoj estis reflektiĝanta en glataj malsekaj muroj de la ŝtona subteraĵo, aŭdeblis, kiel nemalproksime kantas psalmojn katenitaj

katolikoj, kiel ŝrikas maljunulino, kondamnita al ekzekuto pro sorĉado.

— Via nomo? — demandis Axel Sparre.

Des-Fonteines morne nomis sin. Axel Sparre legis la denuncon, skribitan de la ŝipestro de la galero kaj de ferdekestro Sigge. La ĉefleŭtenanto sidis kun mallevita kapo. La kapelpastro legis ateston de la oficiroj, ĉeestintaj la duelon. Lars Des-Fonteines silentis.

— Kiam, kie kaj kiom vi ricevis de la moskvianoj por tio, ke vi laŭdegu iliajn virtojn? — demandis Axel Sparre.

La ĉefleŭtenanto ne respondis.

— Per purkora pento vi ankoraŭ povas mildigi vian sorton! — diris Axel Sparre. — Mi konsilas al vi pensi.

— Sed kiel mi pentu? — demandis post paŭzo Lars Des-Fonteines. — Instruu!

La kapelpastro kaj Axel Sparre duvoĉe komencis konsili al li. La kapo de Lars Des-Fonteines funkciis malbone, sed li aŭskultis atente. Li ne tro kredis la bonvolon de la reĝa prokuroro: post ĉio okazinta en la konsilia halo tiu ne povis deziri lian savon. Ne, li skribos al la reĝo en sia maniero, estas nenia senco en tia stulta morto...

Kaj dum la tuta sekva tago, kvazaŭ en febro, li skribadis humilan petleteron al lia reĝa moŝto. Kaj apude plu ŝrikadis kaj ŝrikadis la maljunulino, kiun oni devis ekzekuti pro sorĉado. Aŭdeblis, kiel ŝi blasfemas kaj alvokas Dion, kiel ŝi batiĝas al la pordo kaj ploregas. En malfrua vespero oni ektrenis ŝin laŭ la koridoro sur la placon — ekzekuti. Kaj en la kastelo Gripsholm estiĝis tia silento, kia, verŝajne, estas en tombo.

Tamen, la subteraĵo ja estis tombo. El ĉi tie oni eliradis preskaŭ neniam...

En la sekva nokto al la ĉefleŭtenanto estis legita la verdikto. Des-Fonteines elaŭskultis ĝin silente, kun streĉita trankvilo. Sed lia vizaĝo nigriĝis kaj tremeris, kiam li eksciis, ke li estas kondamnita al mortekzekuto trioble: pro murdo en duelo, pro senhonorigo de la reĝa persono kaj pro laŭdado de la malamiko.

— Kaj mia petletero? — demandis li mallaŭte.

— Respondo ankoraŭ ne estas! — respondis asistanto de la reĝa prokuroro.

Post pekokonfeso kaj eŭĥaristio, sub malrapida batado de horloĝo sur la urbodomo, la kondamnitoj estis elirigitaj sur la placon. Per grandaj flokoj estis falanta malseka neĝo. Ducent reĝaj trabantoj staris en regula kvarangulo ĉirkaŭ malalta eŝafodo, sur kiu ekzekutisto en ruĝa ĉapo estis akriganta per ŝtona akrigilo sian dekdufuntan hakilon. Estis krakantaj kaj fulgantaj peĉaj torĉoj.

La unua sur la eŝafodon, peze metante la ŝvelintajn, sangantajn piedojn, leviĝis ĝuste tiu homo, kiun la ĉefleŭtenanto ordonis sur la galero torturi per akvo, kiam li estis revenanta al Stokholmo, — Des-Fonteines rekonis lin tuj. Ŝĉerbatij, ŝajnis, kun scivolemo ĉirkaŭrigardis la altajn murojn de la kastelo, la vicojn de trabantoj, la kapelpastron, la asistanton de la reĝa prokuroro... Li estis pri io koncentrite pensanta kaj, eble, eĉ deziris diri iajn vortojn, sed ne sukcesis. Ekbatis tamburoj, la ekzekutisto ĵetis lin sur la ekzekutan ŝtipon, helpantoj de la ekzekutisto disetendis liajn brakojn per ĉenoj, la prizona kapelpastro komencis legi la mortopreĝon, kaj

kun la vorto «amen» la dekdufunta hakilo, kun fajfo disiginte la aeron, forhakis tute la kapon de Ŝĉerbatij.

La tamburoj eksilentis.

Lars Des-Fonteines leviĝis sur la eŝafodon.

La helpantoj de la ekzekutisto streĉis per ĉenoj liajn brakojn, la ekzekutisto batis lin al la dorso kaj faligis sur la ekzekutan ŝtipon. Li perdis konscion, kaj kiam li rekonsciiĝis, li aŭdis vortojn de absolvo, kiujn per egalmezura voĉo estis leganta la asistanto de la reĝa prokuroro:

— «...post kiam, seniginte je la oficira rango, nobeleco, havaĵo, nomo kaj familinomo, ekzili por eterne kiel bagnoremisto en la galeran floton de lia moŝto reĝo, por ke per bona konduto, fasto kaj preĝoj, kaj ankaŭ per konstanta laboro, tiu, kiu nomiĝis Lars Des-Fonteines, povu ripari siajn pekojn antaŭ Dio kaj krimojn antaŭ la reĝo...»

La helpantoj de la ekzekutisto tiris la ĉenojn. Lars Des-Fonteines ekstaris sur la piedojn. La tamburoj ekbatis trian fojon. Komenciĝis rito de degrada ekzekucio.

La vivon li konservis.

Sed kia ĝi estos, tiu vivo?

4. Ili neniigu la urbon!

La reĝo estis forveturonta en Polion, kaj tial la lastaj aferoj estis finataj haste. Ĉe la ĉasa kastelo Kungsör, kie sub preteksto de aranĝo de printempa karnavalo Karolo jam dum kelkaj tagoj estis prepariĝanta al sekreta forveturo, henis rajdaj ĉevaloj; sekvantaj generaloj, vestitaj kampe — en maŝkirasoj sub manteloj, — dormetis sub remburitaj taŭroj, alkoj kaj ursoj en

la galerio de la kastelo; soldatoj de ĉevala bataliono de la gvardio de trabantoj, akompanontaj lian reĝan moŝton, viciĝinte, apenaŭ tenis la kapojn pro dormemo. Dormetis sub vento rajdistoj de la reĝa regimento, reĝaj dragonoj, trumpetistoj, hobojistoj, timbalistoj, tamburistoj...

En malgranda kabineto brulis kandeloj.

Karolo, en griz-verda kampa kaftano, kunmetinte la manojn malantaŭ la dorso, estis malpacience aŭskultanta grafon Piper-on, Nordberg-on, Axel-on Sparre-n kaj generalon Stern-on.

— Neniigi Arĥangelskon eblas ankaŭ per sendo de kelkmila trupo de bordoj de la Ladoga lago, — diris grafo Piper. — Ili iros el Kexholm tra Ladogo kaj Sviro al la norda bordo de la Onega lago, kie iras la antikva vojo sur riveroj kaj per trenoj al la Blanka maro...

— La vojo estas tro longa, — abrupte diris Karolo. — La moskvianoj ĉifos niajn soldatojn...

Palpebrumante, li rigardis la mapon, kiun tenis generalo Stern.

— Ankoraŭ kio?

— Eblas ankaŭ sendi kelkajn taĉmentojn de svedaj kuraĝuloj al la nordaj limoj, por fortiri fortojn de la rusoj disde Arĥangelsko, — proponis Stern. — Jen ĉi tien — al Oloneco — Kondušo...

La generalo montris per la ungo — kiel iros taĉmento.

— Unuavice estas la ekspedicio, — prononcis Karolo. — Kvin ŝipoj malmultas. Sep.

Grafo Piper riverencis.

— Komandos grafo Gyllenstierna!

Piper riverencis ankoraŭ foje. Stern komencis volvi la mapon en tubon. Axel Sparre suspiris.

— Ankoraŭ kio? — demandis Karolo. — Vi ĉiuj estas treege malrapidemaj...

Kapelpastro Nordberg paŝis antaŭen al Karolo. Sabro pendis sur lia maldekstra kokso, dekstre en sako estis metitaj pistoloj. Kiam li moviĝis, iĝis rimarkeble, ke sub la sutano li havas maŝkirason.

— Kion vi deziras? — demandis Karolo sian konfesprenanton.

— Ili neniigu la urbon, — rapide ekparolis Nordberg, — ili finu la ŝipkonstruadon, entreprenitan de la moskvianoj. Forbruligi la ŝipkonstruejojn, forbruligi ĉiujn ŝipajn rezervojn, pendumi sur videbla loko ŝipajn majstrojn — rusajn, danajn, nederlandajn, por ke ili morte timu konstrui ŝipojn, memorfiksu por ĉiam...

— La urbon same forbruligi! — diris Karolo.

Kaj forturniĝis, fajfetante.

— Domaĝi neniun! — alpremante per la polmo la vangon, estis diranta Nordberg. — Ĉu vere, via reĝa moŝto? Neniigi ĉion en la urbo. Ĉiujn kaj ĉion. Dum tri tagnoktoj matrosoj kaj ŝipsturmaj taĉmentoj prirabu la urbon. Kaj preni kontribucion. Via reĝa moŝto, ĉu vere, necesas preni kontribucion?

Karolo estis peneme fajfanta melodion de sturmo: «Tuj piku, haku kaj batu por Dia gloro». La motivo ne estis facila por li.

— Da soldatoj en la ekspedicion preni malpli! — diris Nordberg. — Dungosoldatoj pli bone sukcesos en tiu ĉi afero. Dungitoj estas pli avidaj. Kiu komandos ilin?

— Supozeble kolonelo James, — respondis grafo Piper. — Li longe estis en Arĥangelsko kaj bonege konas la urbon. Li, interalie, opinias, ke necesas forbruligi ankaŭ Ĥolmogoron. Kaj ankoraŭ unu ŝipkonstruejon — Vavĉugon.

— Jes, jes, — ĉesinte fajfi, konfirmis Karolo. — Vavĉugon, Kazanon, Siberion...

Al grafo Piper leviĝis la brovoj, kapelpastro Nordberg milde rememorigis:

— Kazano kaj Siberio dume estas malproksime, via reĝa moŝto. Ni forbruligos ilin iom poste, kiam, venkinte Aŭguston, ni iros al Moskvo.

Karolo kapjesis. Al li oni alportis supon el perligita hordeo — por plifortiĝi antaŭ la vojo.

— Ĉu la trabantojn oni manĝigas? — demandis la reĝo.

— Jes, via reĝa moŝto.

— Per kio?

— Ili ricevis supon el la sama kaldrono.

La reĝo estis manĝanta stare. Axel Sparre rapide raportis pri sekretaj agentoj.

— Kio pri tiuj rusoj en Stokholmo? Ĉu kaptitaj? — ŝmacante, demandis Karolo.

— Unu ruso! — korektis Sparre. — Li estas ekzekutita...

Grafo Piper tenis teleron sur arĝenta pleto, la reĝo

depinĉadis sekan flanon, ne legante, subskribadis paperojn, — kiu agento kien estas destinita.

— Barono Loftus — en Arĥangelskon, — sufloris Sparre. — Li studis medicinon kaj sukcese okupos lokon de kuracisto ĉe vojevodo Prozorovskij. En la petletero, metita al la piedoj de via reĝa moŝto, nia eksa agento en Moskvio, priskribante bildojn de vivo de la moskvianoj, skribas, ke princo Prozorovskij distingiĝas nek per kuraĝo, nek per saĝo. La vojevodo sur Dvino estas kontraŭulo de la reformoj de la juna caro Petro kaj povas esti utila al ni, ĉar li estas treege timigita de la Narva malvenko...

Karolo subskribis, fajfetante.

— Kaj domaĝu neniun tie, en Moskvio! — diris li per severa voĉo. — Eĉ infano en lulilo devas esti neniigita, ĉar el li povas kreski kontraŭulo de nia krono. La ekspedicio estas sendenda sen prokrasto...

La reĝo estis rare parolema hodiaŭ. Probable li mem eksentis tion, ĉar subite sulkis la frunton kaj eksilentis. Plue li ne diris eĉ unu vorton.

Generalo Stern, ekstarinte sur la genuon, rearanĝis al la reĝo ties grandegajn spronojn. Grafo Piper donis verdan mantelon, Axel Sparre — ĉapelon. Nordberg glatigis al Karolo la harligeton de la peruko, metitan en ledan saketon — laŭ militira maniero.

Sur la turo de la ĉasa kastelo ekkantis klariono, de malsupre al ĝi respondis trumpetoj. Sur arbara kampeto, sub densaj piceoj, rigidiĝis artileriistoj kun brulantaj meĉoj en la manoj, prepariĝante al la adiaŭa pafsaluto honore al la foriranta reĝo.

La dua Cezaro, la vikingo inter vikingoj, la juna norda Sigurd, Sigfrido — estis foriranta en profundon de Eŭropo, en Polion, en Saksion, tien, kie lin atendis gloro de la plej granda el la militestroj de la mondo. Malgrasiĝintaj, fordibocîntaj ĉion gvardianoj de la reĝo, oscedante, tintante per la piedingoj, spadoj kaj lancoj, estis eksidantaj sur altajn ĉevalojn. Ili jam revis pri grasaj germanaj kolbasoj, siblantaj sur patoj, pri bona ebriiga biero de Bavario, pri tavernoj, kie la venkantoj ne pagas, pri gajaj, karesaj, rozkolorkorpaj polinoj...

Sur la lignaj, odorantaj je rezino ŝtupoj de la kastelo kapelpastro Nordberg benis la surgenuiĝintan reĝon, generalojn Gyllenkrok-on kaj Rehnskiöld-on, la sekvantaron, la militistaron. Post minuto Karolo jam sidis en la selo, severa, silentema — enkorpiĝo de kavaliro. La reĝa standardo leviĝis super la gvardia regimento. Tamburistoj de la trabantoj levis kaj mallevis la frapilojn. Dudek kvar tamburoj batis «militiro, la Sinjoro benas nin». La reĝo de Svedio forlasis la landon.

5. Lasta malsukceso

Galeraj ŝipestroj sidis en foteloj. Apud ĉiu ŝipestro staris ties ferdekestro — en parada flava kaftano kun arĝenta fajfilo sur la brusto. Galeraj ekzekutistoj kun knutoj en la manoj estis enuantaj je paŝo for de la ferdekestroj.

La ŝipestroj estis drinkantaj brandon kaj tuj post ĝi manĝantaj frititan panon.

Preter la ŝipestroj en longa vico estis irantaj bagnuloj — estontaj remistoj sur galeroj. Tamburo batadis malrapide — la bagnuloj apenaŭ trenis siajn ĉenojn.

La ferdekestroj per sperta rigardo elektadis remistojn, kiuj

ankoraŭ povis labori. Kiam tia bagnulo transpasadis grasan linion sur la ŝtona planko antaŭ la ŝipestroj, ekzekutisto laŭ signo de ferdekestro tuŝadis la bagnulon per la knuto. La bagnulo haltadis. La tamburo eksilentadis. La ekzekutisto kaj la ferdekestro pririgardadis la homon, kiel ĉevalon en foiro: ĉu estas dentoj, ĉu estas nedifektitaj kruroj kaj brakoj, ĉu ne estas rompitaj ripoj en torturo. Se la bagnulo taŭgis, kuracisto de la galera ŝipanaro helpe de forĝisto brulstampadis lin per ardigitaj feraj literoj. Poste bagnulojn, elektitajn por unu galero, oni katenadis per ĉeno — po dek du homoj. La ekzekutisto parkere legadis al ili «regulojn de vivo kaj morto».

La reguloj estis simplaj: pro krimoj oni estis punataj aŭ «per batoj de knuto, ĝis la lasta spiro», aŭ «per morto per pendumo sur oportuna por tio jardo».

La bagnuloj aŭskultis silente, iliaj vizaĝoj esprimadis nenion, krom laco. La ŝipestroj pigre klaĉadis kaj enuadis. Nur la ferdekestroj havis zorgoplenajn okulojn: pri irado de galero respondecis ili. Sed kion eblas fari, kiam bagnuloj malmultas kaj ĉiuj ili estas konsumitaj per torturoj kaj prizonoj, kaj tiuj, kiuj estas iomete pli sanaj, faras ĉion por fuĝi, dum galeroj en la reĝa floto estas multaj kaj remistoj ĉiam ne sufiĉas...

La eksan ĉefleŭtenanton la galera ŝipestro Munk Ahlström rekonis tuj, same kiel ankaŭ ferdekestro Sigge. Knuto kun fajfo eniĝis en la nudan larĝan dorson de la bagnulo. Lars Des-Fonteines haltis. La tamburo eksilentis.

— Ĉu estis vi, al kiu ne plaĉis mia galero? — kun rideto demandis Ahlström. — Ĉu estis vi, kiu insultis min pro tio, ke tro multaj bagnuloj fuĝis de mi?

Ferdekestro Sigge kaj la ekzekutisto ordonis al Des-

Fonteines montri la dentojn, fleksis la brakojn en la kubutoj, elprovis fortecon de la muskoloj. Ahlström plu ridetis, antaŭsentante dolĉon de venĝo. Forĝisto puŝis balgon, ardigis ferajn literojn de la brulstampo tiel, ke ili iĝis blankaj. Post la brulstampado la kuracisto surŝutis la brulvundon per subtila griza pulvo...

Vespere tiu, kiu antaŭe nomiĝis Lars Des-Fonteines, kaj nun, kiel ĉiuj galeraj bagnuloj, havis alnomon — Ŝilingo, batita per knuto al la vizaĝo, kuŝis sur benko, alkatenita al ligna trabo. Super la haveno estis kriantaj mevoj. La galero malrapide balanciĝadis kaj mallaŭte knaretadis.

— He, ulo! — vokis lin iu en la rusa, nelaŭte. — Ĉu la ŝipestro estas sur la ŝipo?

— Sur la ŝipo! — same en la rusa, sentante per ĉasista flaro akiraĵon, respondis Ŝilingo. — Kaj por kio vi bezonas la ŝipestron?

La nekonato desaltis de la albordiĝejo, poste malleviĝis malsupren — al Ŝilingo. Evidente, li estis ĉi tie propra homo, lin ne retenis la gardistoj. Li estis vestita en leda mallonga kaftano kaj bunta kamizolo, kiujn portas bonhavaj metiistoj. Sur lia flanko pendis granda sako, el kiu elstaris koloj de boteloj da rumo kaj vodko.

— Bonege oni vin ornamis! — diris la nekonato, fiksrigardante la ŝvelintan vizaĝon de Ŝilingo.

Li elprenis el la sino volvitan tube pergamenan folion kaj etendis ĝin al Ŝilingo. Tiu prenis. La nekonato flustris:

— Ŝĉerbatij estis ekzekutita. Diru al kiu necesas.

Ŝilingo ŝovis la pergamenon, volvitan tube, sub la ĉemizon.

Lia koro batis ofte. Jen ĝi, la sorto. Tuj li saviĝos. Tuj finiĝos ĉiuj liaj suferoj. La Stokholmaj spionoj estas en liaj manoj. Li — bagnulo, finita homo sen nomo, malkovros tion, kion ne sukcesis Axel Sparre mem.

La nekonato rigardis al li atente. Ŝilingo penis respondi al li per simplanima rigardo.

— Sed ĉu mi ne misrekonis? — demandis maltrankvile la nekonato. — Simono, ĉu estas vi?

Ŝilingo kapjesis.

— Nu, redonu la leteron! — per obtuza voĉo postulis la nekonato.

Ŝilingo enpremiĝis en la galeran flankon. Nun li penis silenti, por ne malkaŝi sian eksterlandan prononcon.

— Donu! — ordonis la nekonato, kaj liaj okuloj minace brilis.

Ŝilingo ne havis armilon, kaj li estis alkatenita. Li montris la dentojn, prepariĝis krii. Tiam subite la nekonato kun terura forto batis lin al la mentono kaj elkaptis la letereton. Ŝilingo perdis konscion, kaj kiam ĝi revenis al li, li aŭdis, kiel la nekonato rakontas al la ferdekestro en pura sveda lingvo:

— Tiu hundo deziris eltiri de mi tranĉilon. Mi konversaciis kun li kiel homo, sed li ĵetiĝis al la gorĝo — strangoli...

Ŝilingo kriis, ke estis ne tiel, sed la ferdekestro svingis skurĝon kaj komencis vipi lin al la razita kapo, al la vizaĝo, al la vangoj. Ekde tiu momento li iĝis elĵetito inter la bagnoremistoj. Ankoraŭ dufoje li penis ekparoli kun la subferdekestroj, sed responde ricevis knutajn batojn...

En la maron ili eliris antaŭ vespero.

Super la grizaj akvoj de la Balta maro naĝis malvarmaj puncaj nuboj. Fajfis mara vento. Kun grinco moviĝadis remiloj en grandegaj remilingoj. Egalmezure, insiste, resone batadis la tamburo, ululadis la timbaloj. Sur la pobo, sub krado, post kiu flirtis la flago, sidis en komfortaj foteloj ŝipestro Ahlström kaj barono Loftus — kuracisto kaj spiono, kiun necesis urĝe veturigi al Uleaborgo, por ke el tie kun dokumentoj de dano li povu penetri en Arĥangelskon. Trinketante verdan benediktanan likvoron, barono Loftus estis parolanta tra la nazo:

— Ankoraŭ nemulte, tute nemulte da tempo, kaj mi havos honoron kaj feliĉon enmanigi al subadmiralo grafo Erik Gyllenstierna ŝlosilojn de la urbo Arĥangelsko, kiu estas la norda pordego de Moskvio. Lia reĝa moŝto akceptos Arĥangelskon aŭ tion, kio restos de ĝi, sub sian potencan manon. Al la rusianoj la vojo al maro estos fermita por ĉiam...

— Ne ekzistas agado pli danĝera, ol via! — diris ŝipestro Ahlström. — Kuraĝo de leono kaj saĝo de serpento devas kombiniĝi en homo, kiu dediĉis sin al la afero de servado al la krono malproksime de Svedio...

— Jes, estas tiel, — volonte konsentis Loftus. — Precizeco kaj bona kvalito de informoj, venantaj de sekretaj agentoj, iam valoras pli multe, ol venko en batalo. Certe, tio, kion faras agento, prezentas ioman danĝeron por lia vivo, sed kio ĝi estas kompare kun grandeco de la krono?

— Gloron al la reĝo! — prononcis la ŝipestro.

— Daŭrigu la Sinjoro liajn tagojn! — pie finis Loftus.

Kvazaŭ fascinitaj de solenaj pensoj, ili ambaŭ eksilentis. La galero estis iranta nemalproksime de plata bordo. Grandega sveda flago — ora kruco sur blua kampo — estis flirtanta post ĝia pobo.

6. Vi komandas la eskadron!

— Nu? — demandis Gyllenstierna.

Grafo Piper enpensiĝis super ŝaktabulo. La subadmiralo atendis malpacience. Finfine Piper movis ĉevalon kaj glutis Burgonjan vinon.

— La reĝo ordonis prepari eskadron! — diris Piper.

— Ĉu al Arĥangelsko?

— Jes, sed dume pri tio neniu devas scii.

— Memkompreneble! — diris Gyllenstierna. — Mi pensas, ke ankaŭ sinjorino Margret pri tio ne devas scii...

Piper subridis:

— Nu, ŝi ja scias. Ŝi ĉiam ĉion scias.

— Se ŝi ekscios, tiam ŝi deziros iri kun la eskadro, — diris Gyllenstierna. — Ŝi delonge prepariĝas al fora marvojaĝo. Kaj esperas pri via helpo en tiu okazo, se mi ne deziros kunpreni ŝin...

La grafo levis la ŝultrojn:

— Vi komandas la eskadron, *herre* Gyllenstierna.

— Sed vi estas la unua persono en la reĝlando, kaj mi devas obei vin.

Piper ekridis karese.

— Ni estas parencoj, *herre* Gyllenstierna, ne necesas forgesi, ke vi estas edzo de mia filino... Kaj se rezoni sobre, do kial ni ne dorlotu ŝin? Ŝi havas ne tiom gajan vivon, ĉu vere?

— Ŝi havas sufiĉe da amuziĝoj! — morne diris Gyllenstierna.

Grafo Piper faris ankoraŭ unu movon. Gyllenstierna rigardis sur la tabulon distrite. Li pensis: «Jes, Margret, certe, deziros iri en Arĥangelskon. Ŝi supozas vidi tie la ĉefleŭtenanton. Ŝin trafos kruela elreviĝo...»

— Pri kio vi ridas, *herre* Gyllenstierna? — demandis Piper.

— Ĉu mi ridas? — miregis Gyllenstierna.

Dum tuta tiu ĉi vespero li estis en bona humoro.

— Sinjorino Margret estas tre bonkora! — diris li al Piper en ĉeesto de la edzino. — Treege bonkora. Ŝi maldikiĝis dum tiuj tagoj, kiam okazis la enketado pri la afero de ŝia amiko de la infaneco ĉefleŭtenanto Des-Fonteines. Ŝi alprenas al la koro malsukcesojn de siaj amikoj de la infaneco. Mi anime ĝojas, ke *herre* Des-Fonteines nun iris en Arĥangelskon, kie li plu servos al la krono...

Akompanante grafon Piper-on, grafo Gyllenstierna diris al li nelaŭte:

— Mi esperas, grafo, ke ni ne afliktos vian filinon per la vero pri la sorto de la malfeliĉa ĉefleŭtenanto...

— Sed ŝi povas ekscii mem...

— Tiam ni diros al ŝi, ke tiu onidiro estas lanĉita en Svedio intence, por tio, ke la moskvianoj aŭdu pri la senglora fino de ilia plej granda malamiko kaj sperta spiono...

Grafo Piper tuŝis la kubuton de Gyllenstierna kaj, subridante, prononcis:

— Tamen vi ja estas ĵaluza, *herre* subadmiralo! Tre ĵaluza!

7. Ŝilingo mortis

En haveno Uleaborgo dum vespermanĝo, konsistinta el tri uncoj da biskotoj kaj akvo, sur la galero de ŝipestro Ahlström komenciĝis incendio. Ekbrulis ŝnuroj en la malantaŭa holdo. Por pli sukcese lukti kontraŭ la fajro, Sigge ordonis malkateni duonon da remistoj. En pluveto kaj nebulo kelkaj bagnuloj tuj saltis en akvon de la maldekstra podio. La dua subferdekestro batis unu fuĝanton per hokstango, la subferdekestron oni atakis kaj momente murdis. Ŝipestro Ahlström ordonis levi sur la masto signalon «sur la galero estas ribelo». Sed pro nebulo kaj pluvo tiun signalon oni ne ekvidis sur la bordo. La malkatenitaj bagnuloj okupis la tutan pruan parton de la galero kaj estis moviĝantaj al la pobo, kie kun pistoloj kaj muskedoj estis defendantaj sin liberaj matrosoj, Ahlström kun Sigge, la unua subferdekestro kaj barono Loftus...

Kelkajn minutojn post la komenco de la ribelo ferdekestro Sigge saltis en akvon kaj naĝis al la pruo. Tie li grimpis supren laŭ la ankra ŝnurego kaj turnis la kanonon al la ribelantoj, sturmantaj la pobon. Per la neobeantaj manoj, kaŝante sin post ŝnuregaj volvaĵoj, li, ŝtopinte mitrajlan ŝargon kaj zorgeme celinte, alportis meĉon al la fuzeo. La mitrajlo faligis pli ol duonon de la malkatenitaj remistoj. Tiuj, kiuj povis moviĝi, saltadis de la ŝipflankoj en la akvon. La dua pafo metis finon al la ribelantoj. La liberaj matrosoj finmortigadis vunditojn per hokstangoj kaj sturmaj hokoj. Barono Loftus, mordante la

lipon, pafadis per pistolo al tiuj, kiuj estis prepariĝantaj salti de la ŝipflanko. Super la galero en la nebula vualo alarme kriadis mevoj.

La flamon oni sukcesis estingi sen granda peno.

— Frenezuloj! — viŝante per tuko la manojn, diris barono Loftus, kiam ĉio finiĝis. — Al kio ili esperis?

Ŝipestro Ahlström blovpurigis per la lipoj la tubon de la pistolo, respondis mallonge:

— Ili esperis al fuĝo, kion ili sukcesis en malgranda parto. Iuj foriris!

Kaj li kriis al tramalseka ferdekestro Sigge:

— Vivajn iniciatintojn — en la antaŭan holdon ĝis Stokholmo. Tie de ili oni deŝiros la haŭton. La malvivajn — en la akvon.

Ĉe la aŭroro matrosoj el siteloj estis priverŝantaj la sangokovritan ferdekon. Elŝipiginte Loftus-on en Uleaborgo kaj surŝipiginte kargon de segita ligno, la galero estis revenanta en Svedion. Ree batadis la tamburo, ululadis la timbaloj. Knarado de la remiloj atingadis la holdon, kie en mallumo kaj sufoka aero estis sufokiĝantaj la bagnuloj, katenitaj ĉe la koloj, la piedoj kaj la manoj.

Ĉar la iniciatintoj kaŝiĝis en arbaroj de Uleaborgo, Sigge katenis la unuajn, kiujn li sukcesis kapti. Inter la katenitoj estis ankaŭ Ŝilingo. En duondeliro li petadis trinki en la sveda, oni ne komprenadis lin, tiam li petis en la rusa:

— Akvon! Trinki!

— Li nian lingvon scias! — respondis unu el la mallumo. —

Aŭskultu, Aleksio, li en la nia akvon petas.

— Li preskaŭ faris katastrofon en Stokholmo, — grumblis alia.

— La letero estis ĉifrita, — flustris la unua, — mi vidis. Ne komprenus la svedoj. Kiu ne scias — neniam komprenos.

— Sed ĉu vi mem scipovas legi? — demandis la dua.

— Unu sakristiano min iomete instruis...

En mallumo Ŝilingo ree petis:

— Akvon!

— Portu al li, — diris la voĉo el la mallumo. — Ja li estas homo tamen, sed ne hundo.

— Hundo ja pli bonas. Hundo tion ne faros, kion li deziris fari... Nin ĉiujn oni pendumus...

Sed tamen tiu, kiu ne deziris doni akvon, — donis. Per la disbatita mano li ĉerpis kaj donis trinki, sed Ŝilingo subite montris la dentojn, batis la argilan kruĉeton, elverŝis la akvon. En la mallumo estis kolere brilantaj liaj okuloj.

— Ĉu vi freneziĝis? — trankvile demandis la ruso. — Kial vi furiozas?

Ŝilingo ne respondis, spiris singulte, kun fajfo. Baldaŭ li denove perdis konscion. Teruraj malbenoj al ĉio ekzistanta en la mondo eliĝadis el liaj sekiĝintaj, sangantaj lipoj. Poste li komencis legi versojn. Feraj strofoj de la «Kroniko de Eriko» sonis en la holdo ne per funebro, sed per senbrida furiozo:

Torditaj brakoj kaj laŭta ploro —
Jen via sorto, edzino de svedo...

Antaŭ la mateno li mortis. Lian korpon oni malkatenis, per hokstango eltiris el la holdo, alligis al la piedoj ŝtonon kaj elĵetis ekster la ŝipon. La malvarmaj akvoj de la Botnia golfo por eterne kuniĝis super li.

Ĉapitro kvina

> Armiloj estas la plej gravaj membroj kaj rimedoj soldataj, per kiuj la malamiko povas esti konvinkita.
>
> *Petro I*

1. En Moskvo

— Ĉu ĝi? — ekkriis Jegorĉjo.

— Ĝi, Jegoro, Moskvo! — respondis Silvestro Petroviĉ.

La urbo malfermiĝis al la vojaĝantoj tuj — freŝa, kvazaŭ lavita de abunda kaj rapida vespera pluvo, la unua en tiu ĉi printempo. La ĉielo momente puriĝis, sub varmaj sunaj radioj ekbrilis pavilonaj kaj bulbaj plafonoj, pintoj de preĝejoj, ekbrilis bunte farbitaj turetoj kun oritaj kaj arĝentitaj leonoj, unikornoj kaj agloj anstataŭ ventmontriloj; en la travidebla aero gaje verdis foliaro de grandegaj, je centoj da klaftoj etendiĝintaj bojaraj ĝardenoj, kaj en silento de apudmoskva arbareto klare aŭdiĝis fora, diversvoĉa, bela sono de Moskvaj sonoriloj...

— Jen kiele! — eĉ kun perplekseco diris Jegoro.

— Tiele, fraĉjo, vidu! — ĝojante pri la admiro de Jegorĉjo, mallaŭte respondis Ievlev. — Jen kiel ĝi etendiĝis...

Ili eliris el la vojaĝa kaleŝo kaj iom staris apude, senvorte fiksrigardante al la krenelaj muroj de Kremlo, al ties sveltaj altaj turoj, al Kitaj-urbo, ĉirkaŭita de brika baraĵo, al kurantaj tra la urbo, tiel maldikaj el malproksime Jaŭzo, Neglinko,

Presnjo, Ĉiĉero, Ora Korno[93], aŭskultante diserv-anoncan sonoradon, ĉiam pli aŭdeblan en la antaŭvespera silento...

— Nu? Ĉu vi satrigardis?

— Ĝin unufoje ne eblas ĉirkaŭrigardi, — diris Jegorĉjo. — Eble, por ĉirkaŭveturi same tempo necesas...

— Kaj nemalgranda necesas, sed vi sukcesos, faros. Vidu, ĉiam vi plendadis, Jegoro, ke Eŭropon kun la tablestroj vi traveturis, sed Moskvon ne vidis. Nun vi ĝisvivis — vi al ĝi rigardas. Riverencu al ĝi, kaj ni veturu, ne estas frue...

Jegorĉjo ĝis la tero riverencis, ree eksidis en la kaleŝon apud Silvestro Petroviĉ. La lacigitaj per la longa vojo ĉevaloj iris malrapide, la ĉaro skuiĝadis sur kavoj, Silvestro Petroviĉ estis nehaste rakontanta al Jegorĉjo plu — pri Ora Hordo, kiel ties malicaj rabatakoj iom post iom pli malmilde kaj sange frakasiĝadis kontraŭ Moskvo, la kolektanto de la granda Rusa lando; rakontadis, kiel ruzaj tataraj Ĥanoj instigadis unu kontraŭ alia rusajn princojn kaj per tio akiradis profitojn: kvereloj, konfliktoj kaj internaj malpacoj de la princoj estis por la tataroj akvo al ilia muelilo.

Avide aŭskultis Jegorĉjo ankaŭ pri Ivano Kalita[94], kaj pri la Mamaja invado[95], kaj pri la batalo ĉe Neprjadvo[96], kaj pri tio,

---

93 Malgrandaj riveroj — alfluantoj de Moskvo-rivero, fluantaj tra Moskvo. Kelkaj el ili nun tute aŭ preskaŭ tute estas enigitaj en tubojn. *(trad.)*

94 Ivano I, alnomita Kalita («Monsako»), 1284/1288–1340 — princo Moskva, grandprinco Vladimira, princo Novgoroda — fama pro sia fortikigo de la Moskva princlando kaj komenco de reunuigo de Rusujo fare de Moskvo *(trad.)*

95 Mamajo — reganto de la okcidenta parto de Ora Hordo. En 1380 lia armeo estis venkita dum lia militiro al la Moskva princlando. *(trad.)*

96 La 8-an de septembro 1380 okazis decida batalo sur kampo Kulikovo («Skolopa»), apud rivero Neprjadvo, en kiu la armeo de Mamajo estis

kiel kuniĝis finfine la rusaj fortoj, por fari rebaton al la terura malamiko, kiu tiom longe, kruele kaj moke turmentadis la popolon rusan.

— Jen kia ĝi estas, Moskvo! — diradis Silvestro Petroviĉ, atente fiksrigardante la randojn de la urbo, kie — kiom povis vidi la okulo — estis farataj laboroj, similaj al tiuj, kiuj okazis en Arĥangelsko por saviĝo kontraŭ la sveda invado: oni fosadis tranĉeojn, instaladis kaptilojn, enfosadis pinajn kurbajn baraĵojn.

Ĉe la bariero severa leŭtenanto kun kuntiritaj brovoj postulis vojdokumenton, legis, ordonis tralasi la vojaĝantojn.

La barieron oni malfermis.

Silvestro Petroviĉ notis interne, ke ankaŭ la enveturejo de la Jaroslavla vojo estas fortikigita, ĉi tie estis konstruitaj el grandaj traboj batalaj turoj, kie lertaj soldatoj povas sukcese reteni atakon de malamika militistaro. En la malnovaj tempoj super la fonto staris kaduka kapelo. Nun ĉi tie staris tera, kvankam nealta, tamen fortika kaj komplika baraĵo, trans kiu ĝis la tempo povus oportune kaŝiĝi militistoj...

— Ankaŭ ĉi tie, Silvestro Petroviĉ, ŝajne oni por la svedo renkonton preparas!

— Bone! — kun trankvila kontento en la voĉo respondis Ievlev. — Kiu, fraĉjo, scias? Eble, Karlo sveda al Moskvo decidos bati! Sed jen Moskvo estas preta. Hodiaŭ mi kaj vi al Moskvo urĝe veturas por helpo, por ke ni havu per kio defendiĝi de la svedo. Nemalmulte ni ricevis de Moskvo, mi pensas — ricevos ankoraŭ. Por la tuta Rusujo Moskvo estas

---

venkobatita. *(trad.)*

patrino, mastrino kaj defendantino. Diros ĝi sian vorton — ricevos ni ankoraŭ el Tulo muskedojn bonajn, kanonojn novajn, kuglegojn. Alian vorton ĝi diros — iros al ni regimentoj por helpo. Ankoraŭ diros — oni sendos al ni majstrojn glorajn, lertulojn, artojn sciantajn, kiel konstrui murojn por fortikaĵoj, por ke malamikaj kuglegoj ilin ne detruu, sed fiksiĝu en ili. Multon povas doni Moskvo-patrino al sia filo urbo Arĥanĝela...

Jegorĉjo ekridis, diris ĝoje:

— Vi kvazaŭ fabelon rakontas, Silvestro Petroviĉ...

Ievlev, ridetinte, balancis la kapon:

— Realaĵon mi rakontas, Jegoro, sed ne fabelon. Plu aŭskultu. Povas ankaŭ tiel okazi, ke ne donos Moskvo-patrino al filo sia Arĥangelsko tion, kion ĝi petas. Multajn ĝi havas filojn kaj filinojn. Eble, alia ĝia filo aŭ filino nun ne malpli, sed pli zorgon bezonas. Eble, al Novgorodo, eble eĉ al Pskovo estas multe pli malbone, ol al nia Arĥangelsko. Ĝi pli bone scias! Kaj diros ĝi al Arĥangelsko: malfacile estas al vi, malbone estas al vi, sed al frato via Pskovo estas eĉ pli malfacile, kaj al frato Novgorodo estas tiom malfacilege, ke multe pli malbone, ol al vi ambaŭ. Kaj ankaŭ al mi ne estas dolĉe. Paciencu...

Jegorĉjo sidis flank-al-flanke kun Silvestro Petroviĉ. Same kiel dum ĉiuj tagoj de la longa vojo, de la vizaĝo de la junulo ne foriradis feliĉa rideto, li jen ĵetadis rigardojn al la kapitan-komodoro, jen al paŝantaj sur stratoj soldatoj en verdaj kaftanoj, jen al la blanka krenela Kremla muro, ĉe kiu estis laborantaj centoj da masonistoj, fortikigante ĝin, anstataŭigante kadukiĝintajn brikojn, konstruante antaŭ ĝi batalajn larĝajn

remparojn...

— Jen, kiela fortikaĵo! — ekkriis Jegorĉjo. — Ne kompareblas kun nia Novdvina...

— De tuta Rusujo ĉi tie estas fortikaĵo! — respondis penseme Silvestro Petroviĉ.

Kiam ili turnis sin al la urboparto trans la rivero Moskvo, Jegorĉjo aĥis, ekmanĝis per la okuloj du grandegajn kanonojn, turnitajn al flosanta ponto. Silvestro Petroviĉ klarigis:

— Por kio, vi pensas, estas tiaj? Por tio, ke el tiu ĉi flanko atakadis patrinon-Moskvon la maliculoj niaj — tataroj, por memoro pri la perforto, farita super la ĉefurbo, kaj por gardo de la estonteco staras tiuj kanonoj ĉi tie...

Li ne finparolis, rememoris:

— Ni veturas kaj veturas! La oĉjon ni preteris! Koĉero, returnu!

Kaj li eksilentis, enpensiĝinte: alia iĝis Moskvo dum la tempo, pasigita de li en Arĥangelsko, tute alia. Pri multo, evidente, instruis Narvo! Multe pli da militistoj estas sur la stratoj, kaj ĉiuj de la nova ordo, paŝas akorde, rigardas kiel agloj. Homoj en stratoj kaj interstratoj estas multe pli severaj, malpli da varoj estas disĵetitaj en bazaroj, ne tiom laŭte kaj voke, kiel en la pasintaj tempoj, krias monŝanĝistoj kaj banistoj, barbiroj kaj reartikigistoj. Novajn domojn nun en Moskvo oni ne konstruas, estas malpermesite, sed da ĉaroj kun ŝtonoj kaj brikoj, kun fero kaj traboj estas multe pli, ol antaŭe: fortikiĝas Moskvo-patrino por ĉia gardo kontraŭ la malica svedo...

Renkonten, tondrante per feritaj radoj, estis malrapide

moviĝanta grandega ĉartrajno. Sur kverkaj ĉaregoj, fiksitaj per feraj krampoj, verdiĝintaj pro aĝo, pezaj, kuŝis preĝejaj sonoriloj. Oni veturigis ilin al la Kanona korto — gisi kanonojn el la sonorila kupro. Post la ĉaregoj, ŝrikante, kraĉante, elkriante malbenojn, tintigante ĉenojn, estis saltanta frenezulo pro Kristo, minacante per la sekiĝinta pugno. La lacaj soldatoj, akompanantaj la trajnon, ne rigardis al la frenezulo: kiom da tiaj estis sur la vojo, laŭ kiu veturis la ĉaroj...

Silvestro Petroviĉ akompanis per rigardo ĉiujn ĉarojn, demandis de la lasta veturigisto:

— Ĉu multe da pudoj?

— Ne malpli ol dudek mil! — respondis la ĉaristo. — Kaj ni ne estas solaj. El tuta Rusujo nun oni veturigas...

— Ĉio pro la Narva malfeliĉo! — diris Ievlev al Jegorĉjo. — Kiom multe ni tie perdis... — Kaj kriis al la kaleŝisto:

— Maldekstren turnu, jen barilo oblikviĝinta, al la pordego!

Post la barilo, en krepusko, vidiĝis la oĉja malnova domo, duloĝeja, kun tureto... Ekknaris la oblikva pordego, sur la peronon vigle elkuris iu en hungara mallonga kaftaneto, simila kaj ne simila al oĉjo Poluektov, kriis per tremanta voĉo:

— Ĉu Silvestreto?

Kaj li gaje ekfrapis per lambastono, kurante laŭ la ŝtupoj renkonten.

2. Plena korbo da novaĵoj

— Kial vi rigardas do? — ridetis la oĉjo. — Ĉu mi aspektas

kiel hundo? Devis ankaŭ mi razi la barbon, nun mi min konsolas: kapro havas longan barbon, sed mallongan saĝon. Do venu jam, venu en la domon. Kun vi kiu estas? Ĉu amiko? Venigu ankaŭ la amikon, ni tagmanĝos, kaj mi ĵus aferojn finis, ne havis tempon ŝanĝi la veston...

Nenio ŝanĝiĝis dum la pasinta tempo en la ĉambroj de la oĉjo. Same ĉie kuŝis manskribitaj folioj, same dece sur bretoj staris libroj, same odoris je absinto, mento, timiano — la herboj, per kiuj sin kuracadis Rodiono Kirilovič. Neestingebla lucerno bruletis antaŭ ikono de la Savanto, en krepusko la kaduka servisto de la oĉjo — Pafnutjič, trenante la nefleksiĝantajn krurojn, estis primetanta la tablon, surmetanta pladojn kun manĝaĵoj, botelojn kun vinoj, kvason.

— Saluton, Pafnutjič! — laŭte, afable diris Ievlev.

— Saluton, Silvestro Petrovič, saluton, karulo! — respondis la servisto.

— La kandelojn do bruligu! — ordonis la oĉjo.

— Ja ne tro mallumas! — grumbleme respondis Pafnutjič. — Trafos vi per kulero en la buŝon, jam sen tio ni kandelojn forbruligas ne laŭ enspezo...

La oĉjo eksidis en sian fotelon ĉe malfermita fenestro, kun plezuro enspirante vesperan freŝecon, odoron de tilioj, plantitaj en la korto, komencis demandi, kiel fartas Manjo, la knabinoj, kiel ili vivas tie en la fora urbo Arĥangelsko. Silvestro Petrovič respondadis kun detaloj, la oĉjo kapjesadis malpacience, estis videble, ke li mem deziras rakonti Moskvajn novaĵojn. Kaj subite li interrompis Ievlev-on:

— Kaj min, Silvestro, oni denove al servo vokis. Je Dio!

Kaj de kiu, vi ne kredos, neveto? De li mem oni vokis. Mi venis al li supren, li akceptis afable, dece. Riproĉis, ke estas tro frue sur forno kuŝi, ke necesas mi, ke da afero por mi estas senlima kampo. Ankoraŭ pri la barbo riproĉis, ne devigis, sed la barbosignon[97] oni al mi alportis. Nu, raziĝis mi. Nuda estas la muzelo, ĉu?

Silvestro Petroviĉ konsolis: vizaĝo kiel vizaĝo, la oĉjo restis la oĉjo, la barbo ne estis tro bela, ne indas bedaŭri. La maljunulo responde balancis la kapon, suspiris:

— Tamen ne povas mi kutimiĝi. Kvazaŭ oni min nuda sur strato kondukas...

Pafnutjiĉ en krepusko diris en kolero:

— Sed min oni eĉ pendumu, eĉ radumu! Ne fordonos mi la barbon!

La oĉjo subridis, komencis rakonti plu, kiel Petro Aleksejeviĉ riproĉis lin ankaŭ pri la vestaĵo — ĉu ne tempas, diris, laŭ la eŭropa modelo vestiĝi, en kaftano pola aŭ hungara, kial, diris, spiregi kaj ŝviti en vesto ĝis la kalkanoj. Rodiono Kirilloviĉ respondis al la caro tiel, ke tiu kaj miris kaj ekĝojis:

— Por slavo, Siro, estas karaktera vesto mallonga, malpeza, batala, — diris tiam Rodiono Kirilloviĉ, — kaj longaj kaftanoj turkaj kaj tataraj venis al ni ne pro ĝojo, sed pro malfeliĉo, — tio estas vestaĵoj sklavaj, tiel la tataroj siajn kaptitojn vestadis, por ke ili rapide kuri ne povu. Tio estas vero!

La Siro respondis, ke eĉ ne necesas brokaĵojn, kaj silkojn, kaj velurojn malŝpari por longbaskaj maloportunaj vestaĵoj. Li

97 Barbosigno — metala ĵetono, kiu servis kiel kvitanco pri pago de speciala imposto pro portado de barbo *(trad.)*

mem estis en mallonga griz-muskolora kaftano, la kolo estis ligita per tuko, la ŝtrumpoj estis de dika lano, ruĝaj, la ŝuoj — kun rimenoj kaj bukoj.

— Ĉu li estis gaja? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Gaja, sed la gajo estis kolera! — diris Rodiono Kiriloviĉ. — La lipharojn li nun supren turnas, rigardas kun moko, ridas ofte, sed tiu rido ne ĝojigas. Ha-ha kaj eksilentas, — rigardas, kvazaŭ per boriloj boras. Ja vere, Silvestro, malfacile al li estas nun, ho, malfacile. Mi ja scias, mi ja vidas...

Ili eksidis al la tablo, Pafnutjiĉ donis kandelojn, la oĉjo verŝis bonan eksterlandan vinon, alportitan por la kara gasto. La vino tute vigligis lin, li hodiaŭ kvazaŭ juniĝis, parolis rapide, gaje, pri nenio plendis, eĉ fanfaronis, ke li fartas multe pli sane, ol en la antaŭaj jaroj.

— Je Dio, Silvestro! Mi kiam forlasis la servon pro multaj miaj malfeliĉoj kaj malsanoj, tuj kiel putra arbostumpo disfalis. Sed nun vi mem vidas — mi vivas. Kaj iras pli facile kaj vidas ŝajne pli klare. Kaj ne laciĝas, kiel antaŭe, kiam mi faradis nenion, kvankam mia afero ne estas facila...

Kaj li komencis rakonti, ke al li estas komisiite estri presadon de libroj en la Presa korto, ĉi tie, en Moskvo, kaj ankaŭ vizitadi Amsterdamon, kie negocisto Tissing gisis laŭ cara ordono slavan tiparon kaj kie ukrajno Elio Teodoroviĉ Kopijevskij, homo klera, skribas kaj presas librojn por Rusio...

— Kopijevskij-on mi en Amsterdamo vidis kaj kun li konversaciis! — diris Ievlev. — Li tre multe da utilo por ni faris, kiam ni estis transmare. Li estas saĝa kaj ne profitema, kiel aliaj viroj tieaj. Kaj ankoraŭ samlandano. Kiajn librojn vi

tie presos, oĉjo?

Rodiono Kirilovi ĉ leviĝis, metis ankoraŭ odorantajn je presinko volumetojn sur la tablon. Tio estis «Aritmetika inicilo», «Kalkulado de rondoj ĉielaj», «Enkonduko en historion ekde la mondokreo»...

Jegorĉjo etendis la manon, malfermis la «rondojn ĉielajn», malvolvis mapon de la stela ĉielo.

— Kio, maristo kaj flota oficiro? — demandis Silvestro Petrovi ĉ. — Ĉu bona libro? Taŭgos, mi pensas?

La oĉjo ver ŝis ankoraŭ vinon, komencis rakonti nova ĵojn pri navigista lernejo, al kiu estas desupre ordonite esti en la Su ĥareva turo super la pordego de Prezento de Jesuo Kristo. Ĉi tie estontaj maristoj povos vidi la horizonton, fari observojn kaj desegnojn. La lernejo nun jam ekzistas, por ĝi venis dungitaj transmare instruistoj kaj mentoroj — profesoro de skotlanda Aberdina universitato Henry Farquharson kaj du liaj kamaradoj Gwyn kaj Grace. En la lernejo oni studos aritmetikon, geometrion, trigonometrion platan kaj sferan, navigarton kaj maran astronomion...

Jegorĉjo kun la libro en la mano rigidiĝis, aŭskultis, fiksinte la ardan rigardon sur oĉjo Rodiono Kirilovi ĉ.

— Kiujn do tien oni prenas? — demandis li subite.

La oĉjo diris, ke infanojn de nobeloj, sakristianoj, metiistoj, servistoj, soldatoj, scipovantajn ne nur legi, sed ankaŭ skribi. Jegorĉjo tiris Ievlev-on je la maniko de la kaftano, tiu respondis:

— Vi sukcesos poste, Jegorĉjo. Vi mem scias, amiko, kiel nun ĉiu homo necesas en Ar ĥangelsko. Kiel do mi vin

forliberigu? Pasos tempo, kaj vi veturos...

Rodiono Kirilovi̇ĉ, trinketante la vinon, rakontadis. Ekzistas, li diris, en la lernejo Leontio Magnickij[98], li scias ne malpli, sed pli ol la tri anglaj fremdlandanoj, kaj kiam ili en deprimo tro drinkas, instruas la navigistojn nur sola Magnickij, kaj tiel instruas, ke ĉiuj estas kontentaj. En tiu navigista lernejo la oĉjo ofte havas okazon esti, kaj li tien liveras lernolibrojn. Ĉio jam antaŭlonge kaj multe pli bone aranĝiĝus, sed nun estas malfacilaj tempoj, okazos granda batalo.

— Da krudfero pli multe necesas! — diris Ievlev. — Da kupro, kanonoj, kuglegoj.

— Antaŭ nelonge mi en Preobraĵenskoje renkontiĝis kun Vinius, — diris la oĉjo, — li diras, ke Hiakinto Demidov el Uralo kvindek mil pudojn da krudfero en ingotoj veturigas. Kvardek li jam liveris. Monsakuloj, negocistoj ektimis post Narvo, inter si diras, ke kontraŭ la svedo ni militi ne povas, necesas, ili diras, paciĝi, ploras, ŝparmonujojn en sekretajn lokojn ili kaŝis — neniu trovos, bonvole ili eĉ duongroŝon ne donos...

— Donos! — trankvile diris Ievlev.

— Ĉu vere?

---

98 Leontio Filipovi̇ĉ Magnickij (1669–1739) — rusa matematikisto, inĝeniero kaj pedagogo (denaska familinomo Teljatin aŭ Teljaŝin; la familinomo Magnickij — de vorto «magneto» — estis favore donita al li de Petro I). Instruisto de matematiko en la Lernejo de matematikaj kaj navigaj sciencoj en Moskvo (1701–1739), aŭtoro de la unua presita en Rusio lernolibro pri matematiko — «Aritmetiko, aŭ scienco kalkula» (malgraŭ la nomo enhavinta ankaŭ informojn pri algebro, geometrio, trigonometrio, astronomio, geodezio kaj navigarto), kiu estis poste uzata en lernejoj dum pli ol kvindek jaroj kaj dum jarcento influadis matematikan edukadon en Rusio *(trad.)*

— Ni elskuos! Kaj poste ili mem prudentiĝos — por ili estas profito. Ni komercos, mi pensas, pli multe, ol en la nuna tempo. La monaĥejan trezoron, oĉjo, ĉu vi ne aŭdis, ĉu oni komencis preni? Tie oro tre multas, ĉe la nigra korvaro...

Rodiono Kirilovič eksvingis la manojn:

— La Triunuan monaĥejon oni nur iomete skuis, sed problemojn ricevis multajn: prenis ja nur mil ormonerojn, sed kiom da bruo! Ne venis ankoraŭ la tempo, jen Greĉjo Talickij[99] kriadis publike multajn teruraĵojn, kaj tiaj Talickij-oj en Rusujo estas ne unu kaj ne du. Korvaro, vere korvaro damnita. Malfacile estas pri mono, malfacile, Silvestreto. Estas tamen onidiro...

Li ĵetis rigardon al ekdormetinta Jegorĉjo, ekparolis flustre:

— Sed ne onidiro — vero! Li mem ja, nia Siro... En la palaco de la Kancelario de sekretaj aferoj de Aleksio Miĥajlovič, la forpasinta caro, li trovis trezoron: leonon oran Venecian, pavon fanditan el oro Bizancan, kalikojn kun gemoj, da taleroj kvar dekduoj da sakoj — riĉaĵo!

La maljunulo ekridis mallaŭte, ruze sulkiĝis per tuta sia malgranda, seka, razita vizaĝo.

— Pensis la bojaroj — ili kaŝos ĝin de li ĝis la tempo, sed ne tia li estas, Petro Aleksejevič, ne tia li naskiĝis. Ĉion li trovis, ĉion mem kalkulis, per la fingro jen tiele — unu, du, tri — kaj liston ordonis skribi en sia ĉeesto, oron kaj arĝenton li mem per pendopesilo mezuris. Aj, bravulo, laŭdas mi la bravulon pro lerteco...

---

99 Gregorio Talickij — Moskva predikisto, transskribisto de libroj, nomadis Petron I Antikristo, alvokadis ne obei lin kaj ne pagi impostojn. Estis kruele mortekzekutita en 1701 *(trad.)*

Kaj ĉesinte ridi, li komencis rakonti alion:

— Antaŭ nelonge alrajdis el Voroneĵo amiko via bona, eksa vojevodo Arĥangelska kaj Ĥolmogora, nun ŝipisto ĉe Dono Apraksin Teodoro Matejeviĉ. Ĉiuj nun rajdas kvazaŭ rabiaj, polvo sur padoj niaj kaj vojoj staras foste, ĉiam «hej!» kaj «hej!», koĉeroj kvazaŭ freneziĝis, galopado kaj fajfado estas en la tuta Rusujo kristana, neniu veturas paŝe, ĉiam ĉiuj hastas...

Silvestro Petroviĉ ridetis: vere, ĉie ĉio estas haste, en la malnovaj tempoj oni tiel ne veturadis, eĉ laŭ lia memoro veturado estis alia — sen hastemo, dece veturadis bojaroj, sed nun la caro mem en kariolo veturas kaj per du fingroj fajfas, ĉevalojn timigas...

— Do, mi diras, — daŭrigis la oĉjo, — alrajdis Teodoro Matejeviĉ, vizitis min, rakontis ion: la caro, ŝajne, nia Petro Aleksejeviĉ, sendis al la pola Aŭgusto trupojn por helpo kontraŭ la sveda Karlo — da infanterio dudek mil homojn. Princo Repnin super ili estras, la militistaro estas bona, fusilojn havas Mastriĥtajn kaj Lieĝajn. Da mono estis sendite al Aŭgusto same nemalmulte. Kaj la pavo ora, kaj la leono Venecia, en talerojn refanditaj, tien veturis. La fremdlandanoj laŭdire pri nia militistaro miregas...

Kiel en la forpasintaj jaroj, kiam Silvestro Petroviĉ estis ankoraŭ junulo, la oĉjo akompanis lin dormi supren, eksidis sur larĝan benkon, kovritan per tuko, brodita per floroj, komencis rakonti pri novaj impostoj, kiuj ankoraŭ ne estas enkondukitaj, sed en proksimaj tagoj estos anoncitaj: imposto pri kverkaj ĉerkoj, pri seloj, pri hakiloj, pri banejoj. Silvestro Petroviĉ leviĝis sur la kubuto, demandis preskaŭ kun timo:

— Sed kie do la popolo monon prenu? Eĉ sen tio per kio ĝi

vivas — mi ne scias: oni ŝelon kun ventumaĵo maĉas, infanoj mortas, kampuloj estas en eskaroj pro malsato...

Rodiono Kirilovič demandis responde:

— Sed kiel fari? De kie preni? Kanonoj necesas, pulvo, drapo — por regimentojn vesti, botoj — por soldataj piedoj, grio, faruno, salviando — por tiun armeon manĝigi. Grenadoj, kuglegoj, muskedoj, fusiloj, bajonetoj — tio nun kostas multe, ĉiu produktisto sian profiton atendas, — kiel pli bone fari? Sed tion ne eblas ne vidi, kiom multe da glora, saĝa, bona estas farata nun: Petro Aleksejevič infanterion sidigis sur ĉarojn, por ke al batalo ĝi freŝa alveturu, ne laca pro marŝado, ĝuste tiel ĝi nun nomiĝas — «veturanta infanterio». Ĉevala militistaro antaŭe per sabro kaj lanco bataladis, nun ricevis la kavalerio rusan mallongan fusilon, rektan sabron kaj pistolon. Kanonojn antaŭe kiu kiajn deziris, tiel gisadis, pro tio en batalo estas embaraso: kanono estas tia, sed kuglego alia. Nun ni gisas kanonojn unuecajn, entute tri specojn: kanonon, mortiron kaj haŭbizon. En la malnovaj tempoj, kaj ne nur malnovaj, ankoraŭ ĉe Narvo, vi mem ja pri tio al mi rakontis, ĉe Narvo, kara mia, homoj plendis, ke artilerio malfruas. Nun tio ne estos: bombardistoj estas sidigitaj sur ĉevalojn, kanonoj de la kavalerio ne postiĝos. Ĉio ĉi sen mono ne fareblas, do kie ĝin preni?

Silvestro Petrovič silentis. La koro puŝe batis en la brusto, la vizaĝo brulis, — estis kaj dolĉe kaj timige aŭskulti la oĉjon: kio, se ne eltenos la Rusa lando tiun senliman strečon de ĉiuj fortoj? Kio, se leviĝos unu post alia vilaĝoj, kio, se la popolo iros kontraŭ la ofendantoj kun forkoj, kun hakiloj, kun palisoj? Ja ekzistas limo de sufero. Imposto pri ĉerkoj! Kie oni vidis

tion? Kaj rememoriĝis subite la vireto, kiu tiam, en la vintra tago, sur la vojo al Ĥolmogoro, en sovaĝa arbaro ĵetiĝis al la armitaj vojaĝantoj. Rememoriĝis ronĝitaj de skorbuto vizaĝoj de laborantoj en ambaŭ ŝipkonstruejoj — en Solombalo kaj Vavĉugo, rememoriĝis forpasinta rudristo Rjabov, Semisadov, majstro Koĉnev, li pensis pri ŝtelisto Schwieber, pri vojevodo Prozorovskij...

— Pri kio vi, Silvestro? — demandis la oĉjo.

Silvestro Petroviĉ paŭzis, poste diris:

— Malfacile, oĉjo.

La oĉjo respondis severe, kvazaŭ kondamnante la vortojn de la nevo:

— Al Ĥilkov Andreo Jakovleviĉ estas multe pli malfacile, tamen li ne ploras. En peza mallibero, sub severa gardo, malforta korpe, havas helan spiriton mia Andreĉjo. Kaptita de la malica Karlo sveda, en prizono skribas la malfeliĉulo la «Kernon de la historio rusia» kaj pri nenio en sekretaj leteroj petas, krom ke oni sendu al li kopiojn de kronikoj, por ke povu li ne nur laŭ memoro sian aferon fari. Tiele, neveto! Nu, dormu, tempas! Mateno donas sagacon, morgaŭ estas multaj aferoj...

Silvestro Petroviĉ blovestingis torditan maldikan kandelon, fermis la okulojn: malgraŭ la laco, kiel ĉiam en la lasta tempo — dormo ne venadis. Klaraj, kvazaŭ matenaj, iris pensoj — li komencis kalkuli kanonojn, pulvan rezervon, fusilojn, kuglegojn — ĉion, kion necesos morgaŭ peti de Petro Aleksejeviĉ.

3. Dum kaftrinkado

Matene, kun lumo, por Silvestro Petroviĉ alveturis sendito de Menŝikov por voki trinki kafon en ties nova domo ĉe Malpuraj Stavoj. Tie, li diris, atendas lin la malnova kompanio, la bonaj amikoj — Teodoro Matejeviĉ Apraksin kaj ambasadoro en Danio Izmajlov, kiu por mallonga tempo venis el urbo Kopenhago. Ĉiuj tri ankoraŭ dormas, sed jam hieraŭ vespere Aleksandro Daniloviĉ strikte ordonis — veturigi al matena kaftrinkado sinjoron Ievlev-on Silvestron Petroviĉ-on viva aŭ malviva...

Ievlev veturis, forliberiginte Jegorĉjon promeni en Moskvo ĝis vespera sonorado.

La sendito — juna kaporalo kun maldikaj lipharetoj super la punca buŝo, en uniforma trikorna ĉapelo kun galonoj, en ŝuoj kun bukoj, en bunta kaftaneto — lerte kondukis kariolon, babilis dum la vojo, ke ne plu estas Malpuraj Stavoj, Aleksandro Daniloviĉ ordonis purigi ilin, putraĵo estis forĵetita, la akvo en la stavoj nun estas tiel bona, ke eblas ĉu trinki, ĉu bani sin, kaj la stavoj nun estas nomitaj Puraj.

— Kiom do kostis la purigo? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ja tute nemulte, preskaŭ senpage. Oni pelis kampulojn el vilaĝeto Mitiŝĉi[100], dum la pasinta somero ili do ĉion faris kiel necesas. Nun de la stavoj malvarmeto blovas, vera paradizo, tre agrable estas sur iliaj bordoj pasigi libertempojn...

Al la nova domo de Menŝikov Ievlev nur aĥis kaj balancis la kapon: ne domo — palaco! Kiom da mono ĉi tien foriris, kiom

100 Nun satelita urbo de Moskvo *(trad.)*

da traboj plej bonaj, da fero, da krampoj, da oro por ortavolo! Jen pordego kun forĝitaj birdoj, bestoj, serpentoj... Nu, Aleksandro Daniloviĉ, kia fripono, ruzulo!

Servisto en longa peruko, en kaftano de profunda griza koloro kun fajreroj, malalte riverencis al Silvestro Petroviĉ, kondukis lin sur la malgrandan tegmenton de la palaco — en internan ĝardenon. Estis aŭdeble, kiel alia servisto ordonas:

— Sebĉjo, premu citronon por la gasto por limonado. La glason viŝu, sur arĝentan teleron metu! Pajlon, por suĉi! Pipon bruligu kun tabako!

Sebĉjo respondis bruske:

— Ja mi nur du manojn havas, ne povas disŝiriĝi...

Oni donis limonadon laŭ la nova modo, al ĝi pajleron, pipon kun tabako. Silvestro Petroviĉ, subridante, pririgardadis ekzotaĵojn de la palaco de Menŝikov: memludantan sub vento pendantan liuton, kiu de tempo al tempo eligadis delikatan miaŭadon, nanajn arbojn, plantitajn en bareletojn, volviĝantan sur arĝentaj stangoj vinberujon, bonodoran pizon, ribarbustojn de neordinara grandeco, ruĝajn florojn de transmara eglanterio...

— Ĉu ne parolas? — demandis ie trans arbustoj la voĉo de Sebĉjo.

— Silentas, hundaĉo! — respondis alia voĉo.

— Vi de ĝi la kovrilon demetu! — ordonis Sebĉjo. — Demetos, kaj ĝi ekparolos.

— Ĝi dormi deziras...

— Sed vi ĝin incitu! — konsilis Sebĉjo. — Vi pri ĝi ridu, —

ĝi treege ridon ne eltenas...

Malsupre en matena nebulo arĝentis la Puraj Stavoj, ĉi tie, en la interna ĝardeno, en foliaro estis intervokantaj en siaj oritaj kaĝoj dresitaj koturnoj, fremdlandaj kanarioj, Kurskaj najtingaloj.

Silvestro Petroviĉ gustumis limonadon, fumis la pipon.

— Ĉu ĝi koleras? — demandis Sebĉjo.

Responde abomena nehoma voĉo raŭkis:

— Kr-r-reteno!

Silvestro Petroviĉ ĉirkaŭrigardis, neniun ekvidis.

— Kr-r-reteno! — ree kriis la sama abomena voĉo.

— Jen, ekparolis! — kontente diris Sebĉjo.

Ievlev deŝovis per la manoj branĉon de ekzota arbo, ekvidis kaŝitan papagon, subridis: verŝajne, jam ekde la vespero prepariĝis Aleksandro Daniloviĉ mirigi la gaston.

Super la kapo de Ievlev, sur turo, ekludis muziko, ekbatis malgrandaj timbaloj, ekzumis kvazaŭ kornoj, — prepariĝis al batado horloĝo de Menŝikov, aĉetita de li en Londono.

Silvestro Petroviĉ taksis kolere, kiom da oro estis malŝparita por ĉi ludiloj, kiom da kanonoj eblis gisi per ĉi mono. Sed kiam li ekvidis la saĝan, gajan, ruzan vizaĝon de Menŝikov — li ĉion forgesis kaj brakumiĝis kun li forte, memorante nur tion bonan, pri kio famis Aleksandro Daniloviĉ: kaj lian temeraran kuraĝon en la Narva, jam malgajnita, batalo, kaj kiel ĉe ajna eta bezono li fordonadis tutan sian oron por la ŝtataj aferoj, kaj kiel sentime li defendadis siajn malnovajn amikojn-ludsoldatojn antaŭ Petro Aleksejeviĉ...

— Nu! — estis diranta Menŝikov, forte kunpremante per siaj feraj manoj Silvestron Petroviĉ-on. — Jen kiele! Alveturis kaj ne venas! Ĉu vi tro fieriĝis? Sed atendu, atendu! Vi estas kun lambastono, ĉu vere? Ĉu la piedoj ne iras? Atendu, lasu min rigardi! Ne, frato, tiel ne taŭgas. Teodoro, kara amiko, venu ĉi tien tuj! Izmajlov, sufiĉas ronki! Silvestro estas ĉi tie...

Apraksin eliris en la internan ĝardenon jam vestita, en peruko, en mallonga malpeza oportuna kaftano. Li etendis laŭ la nova maniero la manon, sed ne retenis sin, brakumis, kisis. Diketa, malalta Izmajlov elkuris el trans ribarbustoj en subvesto, ankoraŭ dormema, postulis vinon, por drinki je la inervidiĝo de la malnovaj amikoj.

En la manĝosalono staris fremdlandaj foteloj, tegitaj per orita ledo, post ĉiu fotelo estis deĵorantaj kun rigidiĝintaj vizaĝoj servistoj en livreoj kun ostaj butonoj. Aleksandro Daniloviĉ, ĵus eksidinte en fotelon, estis urĝe vokita en ĉambron, nomatan «kabineto»: venis delonge atendata impostisto pro ŝtata afero. Elirante, Menŝikov diris:

— Kvieton mi neniam havas, ĉu vi kredas, Silvestro? Kaj tio estus ne grava, se oni min sen neceso vokus. Sed ĉio estas necesa afero, kaj ĉio estas urĝa, kaj se mi ne sukcesos — post paso de tempo mi al mi mem ne pardonos...

Li revenis baldaŭ kontenta:

— Ruzaj estas uloj, je Dio. Tielaĵon elpensas — mi nur miras. Vi gustumu, karaj gastoj, min ne atendu, tie da homoj kunvenis amasego. Floton ni konstruas, mono necesas, lernejon navigistan ni establis — ankoraŭ monon donu, la svedon bati intencas — ree donu oron! Jen mi turniĝas, kiel povas!

Li eltrinkis unuglute tason da kafo, maĉis ŝinkon, viŝis la manojn je la kamizolo kaj ree direktis sin en la kabineton — gvidi aferojn. Izmajlov, akompanante lin per rigardo, kun sia delikata subrido rimarkis:

— Eĉ paŝas nia Aleksandro Daniloviĉ alie. Vere — ministro. De kie tio aperis...

Apraksin, same ridetante, respondis:

— Saĝa, ho, kiel saĝa. Kaj la menso, kaj la okulo estas akraj, tian oni ne trompos. Antaŭnelonge okazis: unu fremdlandano, inĝeniero, malĝojis: diris, oni pri Menŝikov diras, ke li ne estas de nobela deveno, sed la korojn ĝis la fundo travidas...

Turninte sin al Ievlev, li demandis:

— Ĉu pri Kurbatov vi aŭdis?

Kaj li balancis la kapon:

— Viro de granda saĝo! Granda! Kaj kiu divenis? Li, Aleksandro Daniloviĉ. En la Transporta kancelario oni leteron trovis — estis subĵetita kun surskribo: «Porti al la cara moŝto, ne malsigelinte». Nu, oni portis, sed pro manko de la cara tempo anstataŭe legis Menŝikov. Legis, kaptis sian kapon: aĥ, diras, gratulas mi vin, Petro Aleksejeviĉ, pri neatendita ĝojo. Sinjoro bombardisto la leteron kaptis, kaj tie estas pri stampopapero, ke ĝin necesas vendi: por petskriboj, por kontraktoj, por ĉiuj negocaj kaj ceteraj dokumentoj — papero kun blazono de kopeko ĝis dek rubloj. Servutulo de Petro Petroviĉ Ŝeremetev — Kurbatov elpensis ĉi donacon al la trezorejo, kaj Menŝikov tuj divenis, kiom utila estas tia homo. Nun Kurbatov estas lia unua helpanto.

Silvestro Petroviĉ fiksrigardadis al la vizaĝoj de la amikoj. Ili maljuniĝis, speciale Teodoro Matejeviĉ, aĝe li ne estas maljuna — kvardek jarojn, sed aspektas por tutaj kvindek. Kaj la rigardo iĝis distrita, — okupas lin pensoj, da zorgoj estas nesupereble multe, li aŭskultas atente, sed aŭdas ne ĉion. Kaj Izmajlov, kvankam subridas, kvazaŭ gaja, mem nomas sin diboĉulo, tamen videblas, ke ankaŭ li laciĝis, — malfacile al li, verŝajne, estas tie, en la fora urbo Kopenhago. Kaj Aleksandro Daniloviĉ jam ne estas tiu brava falko, kiu en la pasintaj tempoj sciis nur elpensaĵojn, petolojn kaj mokojn. Kiele do estas al Petro Aleksejeviĉ mem?

El la kabineta ĉambro por momento aperis Aleksandro Daniloviĉ; ruze rigardante, li ĵetis sur la tablon grandan paperan folion:

— Legu, amikoj. Ĉi cirkuleroj estas sekrete dissendataj de reĝo Karolo. En multaj nobelaj familioj ili estas legataj kun utilo por la reĝo de la svedoj...

Izmajlov komencis voĉlegi, Apraksin kaj Ievlev aŭskultis. En la sveda subĵetita letero estis skribite, ke caro Petro nepre neniigos ĉiujn bojarajn familiojn en Rusujo, kaj ankaŭ nun li enpostenigas en la ŝtato malnobelajn homojn, eĉ servutulojn, neniom atentante la devenon. Por savi la rusian nobelaron de ĉi amara plago kaj ruinigo, devas ĉiu, kiu estas racihava kaj antaŭen rigardi kapablas, por caro Petro ne militi, sed transiri al la sveda militistaro, kie al ĉiu rusia nobelo estos faritaj honoroj kaj donitaj postenoj, konvenaj al ties deveno kaj eminenteco...

— Nu, kiel ruza estas Karolo! — eldiris Izmajlov, kunmetante la cirkuleron. — Al la dolorpunkto batas...

— Por junaj nobelidoj pli dolora punkto ne troveblas, —

respondis Apraksin. — Kaj ankaŭ multaj maljunuloj tiel pensas... Konas Karlo nian aĥilan kalkanon...

Post matenmanĝo, kiam ili komencis trinki kafon, Izmajlov demandis Ievlev-on:

— Ĉu vi almenaŭ dormas sufiĉe, Silvestro? Mi, je Dio, revas pri nenio, krom tradormi nokton de suno ĝis suno...

Menŝikov, jam en la pordo aŭdinte la vortojn de Izmajlov, negaje ekridis:

— En la transmondo, fraĉjoj, ni satdormos. La nia, ĉu vi aŭdis, kion nun elpensis? Veturi bonvolu nur nokte, kaj tage aferon faru. En sia ĉaro li rimenojn lokis, per ĉi rimenoj li sin fiksas kaj tiel, fiksita, dum la tuta nokto veturas kaj dormas. Kaj matene — kie ajn li estu — laboras. La samo estas ankaŭ al ni ordonita. Iom post iom ankaŭ mi al tio kutimiĝis... Kaj kiel ja alie fari?

Li ŝovis al si la kafkruĉon, verŝis tason ĝis la rando, trinkis iomete:

— Vivas ni en multaj penoj. Nia Silvestro ne aĝas ankoraŭ tridek kvin, sed jen, maturiĝis, sur tri piedoj lamas. Teodoro Matejeviĉ je ĉirkaŭ dek jaroj pli aĝa aspektas, ol li estas. Min antaŭnelonge mia propra avo vizitis, — je Dio, li aspektas pli juna ol mi. Vi, li diras, vinon malpli drinku. Sed kiel ne drinki, se alie ne eblas ekdormi? Ja por kio pri tio paroli? Rakontu, Silvestro, ni vin aŭskultos. Ĉu vin ankoraŭ ne subpremis Prozorovskij?

Silvestro Petroviĉ diris, ke ne subpremis, sed al tio ĉio iras: li fremdlandanojn indulgas, spionojn favoras, ĉe li mem tia ulo kiel kuracisto servis — Lars Des-Fonteines. Ĉi vojevodo

Prozorovskij estas malica, stulta, malkuraĝa senmezure, eblas atendi de li ajnan malfeliĉon. En la estonta batalo de li, krom malhelpo, nenio estos.

Izmajlov, verŝante al si jam malvarmiĝintan kafon, diris al Menŝikov:

— Tamen al Kukujo pri li bonaj sciigoj venas, ke kvazaŭ li estas klera vojevodo, multe helpas al la ŝtata afero kaj la fremdulojn ne malhonorigas kaj ne misfamigas. Mi mem kun Aleksandro Daniloviĉ hieraŭ aŭdis.

Menŝikov kapjesis, komencis ŝtopi la pipon.

— Ĝuste por tio li en la vojevodeco en Arĥangelsko sidas, — diris Apraksin. — Post kiam mi kaj Silvestro al ŝtelistoj-fremdlandanoj ilian lokon montris, ili multajn petskribojn ĉi tien tra Kukujo sendis, tiuj petskriboj sian celon atingis. Princo Prozorovskij pri tio forte memoras, ke estas ordonite al li fremdlandanojn ne ofendi. Ke ne tro saĝa li estas — Petro Aleksejeviĉ scias, ke ne estas kuraĝa, tio estas de Dio, ĝuste por tio Ievlev tie sidas, sed tamen li estas fidela ne malpli ol la forpasinta Lefort. De tiu la pafistoj la kapon deziris ricevi en Moskvo, kaj de Prozorovskij — en Azovo. Pri li, kion ajn vi diru, Petro Aleksejeviĉ tutegale pensos: estas tiel, sed tamen li estas fidela al mi homo. Eble, oni mensogas, sed mi aŭdis, ke la princo-cezaro eĉ ĝis nun la azovajn pafistojn per siaj torturistoj torturas...

— Pri tio ni ne povas scii! — morne interrompis Menŝikov.

— Sed vidu — ni scias.

— Kaj se vi scias, do silentu...

Izmajlov, trinketante kafon, diris:

— Kiu ajn en Moskvion veturas, kiun ajn diabloj alportas, ho Dio! Venas li al mi en Kopenhago, mi al li paspermeson ne donas, li al Kukujo petskribon sendas. Al mi letero venas: he, Izmajlov, he, tro saĝa vi, hunda filo, iĝis. Sed mi ja en Danio pli bone vidas, ĉu ne? Li venas por paspermeso, kvazaŭ dano, kiel decas, sed mi ja scias, ke li estas svedo, sed ne dano...

— De kie vi scias? — demandis Apraksin.

Izmajlov ĵetis al li delikatan rigardon, respondis kun facila subrido:

— Ĉie rusaj homoj estas, Teodoro Matejeviĉ, nur al ili mi esperas.

Li ĉirkaŭrigardis la vizaĝojn de la amikoj, ekparolis malmilde:

— Mi pensis, Narvo instruos. Ĝis nun en miaj oreloj estas la soldata ĝemo: «Perfidis la fremduloj, perfidis la fremduloj, al la svedo foriras». Tiam mi kun la kavalerio de Ŝeremetev estis, pro tiu krio la lastaj fortoj nin forlasis. Kaj tiam trafis al mi, estu li por ĉiam damnita, de Croy. Blizardo blovas, li misrekonis, evidente, — demandas, kie estas reĝo Karolo. En la germana demandas. Mi furioziĝis, komencis lin per sabro vipi, sed al li nenia malutilo — li estas en kiraso, mi nur la sabron rompis... Ne, ne instruis Narvo. Estas ordonite al neniu rifuzi, al ĉiuj mi devas paspermesojn doni. Kaj Dio mia bona, — ŝtelisto, latrono, nenion scipovas, laŭ la vizaĝo videblas, kia estas homo, je Dio, mi ne mensogas. Unu venis en la ambasadejon — skatolon kun inkujo ŝtelis. Kaj mi donu al tia ulo paspermeson. Ne donis mi, hodiaŭ mi respondecos...

Aleksandro Daniloviĉ kun tondro deŝovis la fotelon, trairis

la ĉambron, promesis:

— Hodiaŭ ne vi sola respondecos, ankaŭ Silvestro. La negocisto-ŝipestro, kiu en la urbon Arĥanĝelan mare venadis, Urquhart, tia dikmuzela, — ĉu vi ne forgesis, Silvestro? Vi kun Teodoro malpermesis al li plu venadi al Dvino...

Apraksin kaj Silvestro Petroviĉ rapide interrigardis.

— Nu, memoras mi Urquhart-on!

— Se vi estus forgesintaj, — hodiaŭ Petro Aleksejeviĉ rememorigus. Li tre koleras...

— Sed pro kio?

— Ja pro tio, Silvestreto, ke antaŭnelonge la ambasadoro angla petskribon al la Ambasada kancelario sendis pri malhonorado kaj subpremado de negocistaj rajtoj de ŝipestro Urquhart...

Silvestro Petroviĉ silentis iom, pensis, poste leviĝis de la tablo:

— Ĉu la angla ambasadoro? Kaj kial do ĉiuj angloj svedajn spionojn defendas? Nu, kio estos — tio ne eviteblas. Mi veturos!

Apraksin same ekstaris. Komencis enkolekti disĵetitajn en la hieraŭa vespero ŝipajn desegnaĵojn. Menŝikov kuntirinte la brovojn iradis el angulo en angulon. Paŝoj liaj sur la tapiŝo ne estis aŭdeblaj. Du servistoj estis senmove atendantaj, pretaj vesti Aleksandron Daniloviĉ-on. Izmajlov sidis ĉe la tablo, movante la lipojn, legadis iujn vortojn, skribitajn sur mallarĝa paperfolio.

— Vi drinkigos min hodiaŭ ĝis ebrio, — diris li subite al

Ievlev. — Jen li, via Urquhart — la plej inda viro. En la ekspedicio, kiun Karlo sveda preparas al Arĥangelsko, estas nomumita kiel ŝipestro Jan?

— Jan Urquhart! — konfirmis Silvestro Petroviĉ.

— Jan Urquhart! — ripetis Izmajlov. — Malnova de milita floto oficiro, devene anglo, en la sveda reĝa servo dum dek tri jaroj...

— Ĉu vere? — ekkriis Apraksin.

— Ĉi folio, — diris solene Izmajlov, kaj lia dika, ĉiam gaja vizaĝo iĝis severa, eĉ malmilda, — ĉi folio estis ricevita de mi ankoraŭ en Kopenhago de fidela homo, rusa devene kaj kore, dum multaj jaroj loĝanta en Stokholmo. Ĉi viro, kiun Rusujo per nenio, krom monumento, danki povas pro liaj sennombraj kaj gloraj heroaĵoj, estas tiom kuraĝa, ke eĉ al nia Andreĉjo Ĥilkov en lian malliberon venadas kaj sekretajn leterojn de li kaj al li portas...

— Sed kiu do li estas? — malpacience demandis Menŝikov. — Kia nomo estas de ĉi viro?

— Lian nomon mi nur al unu homo diros, — respondis Izmajlov. — Kaj eĉ ne en palaco, sed sur libera kampo. Sed vi ne koleru, Aleksandro Daniloviĉ, kiel al vi la nomo utilas?

Menŝikov svingis la manon, ne ofendiĝis. Izmajlov, strekante sur la folio per la malmola ungo, estis rapide leganta la sekretan skribon:

— Ĉefkomandanto — subadmiralo Gyllenstierna. Maljuna, sperta, kuraĝa, kruela, neŝancelebla en batalo. Komandanto de la ŝipataka kaj surtera taĉmentoj — James, kapitulacis ĉe Narvo, estis en Rusio. Komandanto de la flagŝipo — Urquhart

Jan, estis en Arĥangelsko plurfoje, sperta maristo...

Izmajlov gardeme kaŝis la folion, frapis Ievlev-on al la ŝultro, konsilis gaje:

— Ne malkuraĝu! Multfoje ni pereadis, tamen plu vivas. Ni rebatos. Ni montros la anglan ambasadoron azeno.

Kaleŝo jam estis atendanta, sesopo de grizaj makulaj multekostaj ĉevaloj estis prancanta. Aleksandro Daniloviĉ intence iom prokrastis, por ke la gastoj aprezu pavajn egretojn sur la kapoj de la ĉevaloj, velurajn, en perloj rimenojn, arĝentajn pezajn kvastojn, malgrandajn, ornamitajn per ora brodaĵo selojn. La gastoj aprezis, Aleksandro Daniloviĉ ridinde kunmetis la lipojn tube, afliktiĝis ŝerce:

— Aj, peza por mi edifo pro ĝi, pro la jungaĵo, estis! Aj, por ĉiam mi memoros...

— Ĉu per bastono li batis? — apenaŭ reteninte ridon, demandis Apraksin.

— Kaj per la piedoj, kaj per bastono, kaj per globuso kupra...

— Globuso?

Menŝikov kapjesis.

— Globuso. Sed ĉu la peko estas granda? Vere eta, kiel birdo. Negocistoj la jungaĵon kun la kaleŝo donacis...

Li turnis la kapon, rideris kaj, grimpante en la kaleŝon, plendis:

— Oni al mi donacas, sed li min batas. Ĝis nun li min ne pardonis. En lia ĉeesto mi en ĉi kaleŝo ne veturas. Nun por la karaj amikoj...

La ĉevalseso tuj ekiris trote, minace ekkantis trumpeto de la postiljono, la kaleŝo mole ekbalanciĝis sur fortaj risortoj, kun krioj «for, he ho, for!» antaŭen ekkuris kuristoj en lazuraj kaftanoj, en marokenaj botetoj, en ĉapetoj kun plumetoj. Aleksandro Daniloviĉ retrokliniĝis sur kusenojn, dolĉe fermetis la okulojn, diris kun suspiro:

— Pekas mi — ŝatas bonan veturadon. Eble, la sango en mi influas? Kiel vi pensas, Silvestro Petroviĉ? Patro mia ja estis ĉevalisto, ĉu pro tio ĝi estas?

Dum la tuta vojo ili rememoradis la infanajn jarojn, la ludsoldatan servadon, ridindajn kaj malgajajn okazintaĵojn de la pasintaj jaroj. Apraksin subite rememoris, kiel Petro Aleksejeviĉ ordonis meti en la Kruca palaco lignan kuvegon je du mil siteloj da akvo, kiel en tiu kuvego flosis malgrandaj ŝipetoj, la velojn de tiuj ŝipetoj oni blovadis per vento de forĝista balgoblovilo, kiel pafadis malgrandaj kanonetoj per vera pulvo...

Izmajlov ekridegis, ferminte la buŝon per la polmo:

— La tronon oni trabruligis, ĝis nun neniu scias, kiu tiun malicaĵon faris...

— Kaj kiu? — vigle demandis Menŝikov.

— Ja mi trabruligis! — ridante, respondis Izmajlov. — Pulvon en bovlo mi al la bombardisto portis, kaj Jakimĉjo Voronin, petolema estis la forpasinto, prenis braĝon kaj ĵetis en la bovlon. Ektimis mi, la bovlon apud la trono ĵetis. Poste vi mem vidis...

— Fenestron ankoraŭ iu frakasis, de blua vitro, Venecia, multe kostis! — rememoris Silvestro Petroviĉ.

— Tio estis mi! — ruze ridetante, diris Menŝikov. — Kaj la fenestron mi frakasis, kaj la lucernon, kaj la ikonon deŝiris senintence. Estis tempo — ni ludis, amuziĝis per ŝipetoj. Kaj nun nia Silvestro estas kapitan-komodoro de floto. Jen la kuvego kun ŝipetoj en la Kruca palaco...

La kaleŝo trairis la barieron kaj mole ekruliĝis sur kampara nepavimita vojo. Menŝikov mallevis la vitron, varma venteto movis la pompajn buklojn de lia peruko.

4. Ĉe Petro Aleksejeviĉ

La caron en Preobraĵenskoje ili ne trovis. Deĵoranta servosoldato rakontis, ke Petro Aleksejeviĉ ĉe matenruĝo kun Vinius forrajdis al la Kanona korto — rigardi novajn mortirojn. De tie li devos viziti ekzercadon de la Butirka kaj Semenovska regimentoj kaj intencis ankoraŭ veturi al Kremlo, — ekmalsanis carido Aleksio. Al ĉiuj, kiuj venos por afero, estis ordonite atendi ĉi tie.

Ĝis tagmezo en la ĉambro, kie en malnovaj tempoj bojaroj atendadis caran vokon, kuniĝis multaj plej diversaj homoj: estis ĉi tie tolaj majstroj kun specimenoj de nova teksaĵo; estis komizo el Ŝnura korto; estis riĉa negocisto Zadiĥin kun fera erco en pako, por montri al la caro; estis korpulenta subkolonelo Ugoljev, alrajdinta el Pskovo, por ke Petro mem rigardu desegnaĵon de urbaj fortikaĵoj; estis kapitano Zubarev, nomumita de la caro defendi la Peĉoran monaĥejon post kiam malpenema Ŝenŝin estis skurĝita kaj ekzilita al Smolensko kiel soldato. El Novgorodo venis alta, rapida, inteligenta oficiro Rĵev. Li sidis en angulo, foliumadis novan libron — regularon

de infanterio, kun miro turnadis la kapon.

Silvestro Petroviĉ konis kaj Ugoljev-on, kaj Zubarev-on, kaj Rĵev-on. Ĉiuj kvar eliris sur la peronon, eksidis apude, komencis konversacii pri tio, kiu kiel sin gardas kontraŭ la svedo. Rĵev prenis vergon, komencis sur sablo desegni, kiel li konstruas ĉe si palisarojn kun paftruoj, kiel surŝutas teron — kontraŭ kuglegoj de la svedo. Ugoljev rakontis, ke en Pskovo pro manko de tempo li demetis ĉiujn lignajn tegmentojn de domoj, rompis banejojn, — necesas ligno. Kaj estas mirinde — la popolo ne tre bruas, petskribojn ne skribas: la homoj komprenas la aferon. Zubarev elprenis el sako folion, komencis demandi Ievlev-on, kiel ĉe li en la Novdvina fortreso oni konservas pulvon, ĉu tiel, kiel ĉi tie en la folio estas montrite, aŭ alie. La suno komencis bruligi pli forte, poste sur la peronon falis ombro, pro la konversacio la oficiroj ne rimarkis pason de tempo. Ne rimarkis, kiel venis Petro Aleksejeviĉ, kiel, tirante dumvoje la kapon kaj pri io riproĉante Romodanovskij-on, iris al si tra alia perono...

— Zubarev! — laŭte kriis la cara servosoldato. — Tuj! Ne sidaĉu!

Post Zubarev ekiris la komizo el la Ŝnura korto, estis nelonge, revenis gaja. Ugoljev kaj Rĵev ekiris kune, post ili estis vokita la majstro el la tola fabriko; tra la malfermita pordo Silvestro Petroviĉ aŭdis la voĉon de Petro:

— Kaj tuj faru, por atendi ne estas tempo, — ĉu vi aŭdas, Ĥivrin!

La majstro eliris retropaŝe, la pordo ree fermiĝis. Izmajlov demandis la majstron flustre:

— Kion li mem faras? Ĉu tornas?

— Tornas! — respondis la majstro. — Ŝipan pulion tornas.

Izmajlov turnis sin al Silvestro Petroviĉ, diris kuraĝige:

— Ĉio estos bona, Silvestro. Se li tornas, tiam estas en bona humoro. Ĝusta signo...

Menŝikov kun Apraksin iris sen voko, la deĵoranta servosoldato vokis Izmajlov-on. La lasta eniris Silvestro Petroviĉ. Caro Petro sen kaftano, en mallonga matrosa pantalono, en la sama, kiun li portis, kiam laboris en ŝipkonstruejo en Holando, estis tornanta sur tornomaŝino tritruan pulion por ŝipo. La piedo de lia longa kruro en trivita leda ŝuo sen peno, ritme kaj kviete premadis pedalon de la transmisia rado; blanka bonodora rabotaĵo, volviĝante, fluis el sub la tornotranĉilo. Laborante, li atente aŭskultis Izmajlov-on kaj fojfoje ĵetadis al li rapidajn rigardojn de siaj sagacaj konveksaj malhelaj okuloj. Silvestro Petroviĉ haltis ĉe la pordo, pro knarado de la tornomaŝino li ne aŭdis, nur foje distingis akran ekkrion de Petro:

— Nu? Kaj vi eble pensis — la angloj pro nia floto ĝojas? Ĉion ili mensogas, ŝtelistoj, en nenio al ili eblas fidi!

Unu fenestro estis malfermita, tie trans la muroj de la kaduka palaco estis bruanta ĵus aperinta foliaro de maljunaj kverkoj, aceroj, ulmoj, fraksenoj. Tra diverskoloraj vitroj de la fenestroj sunaj radioj — ruĝaj, verdaj, bluaj — estis falantaj sur riĉajn velurajn benkokovrilojn, sur broditajn per perloj fenestrobretajn kovrilojn, sur tureton kun malnova horloĝo: malrapide rondiras la ciferplato, kaj super ĝi, kvazaŭ lipharoj, senmove staras la montriloj. Kaj estis strange vidi ĉi tie, en la

palaca halo, kie iam staris junuloj-gardistoj kun oraj bukloj ĝis la ŝultroj, kun anĝelaj vizaĝoj, en neĝblankaj vestoj, en ermenaj ĉapetoj, kun arĝentaj hakiletoj en la manoj, — strange estis vidi ĉi tie grandan pezan nigran tornomaŝinon, amason da rabotaĵoj, kaj sur la ardeza tablo — ferajn ŝraŭbojn, cirkelon, muskedan tubon. Mirinda ŝajnis tio, ke ĉi tie, kie nun staras modeloj de galiotoj kaj fregatoj, kanona afusto, kie kuŝaĉas specimenoj de veltolo, de ŝnurego, kie estas ĵetita sur tapiŝon malgranda ankro, — nur antaŭ tiel nelonge bojaroj ĉirkaŭadis la triŝtupan podion de la trono, plenumante antikvajn ritojn de bizancaj imperiestroj...

— Silvestro! — ne returnante sin vokis Petro.

Silvestro Petroviĉ reordigis sur si la kaftanon, retenante la spadon per la maldekstra mano, per la dekstra apogante sin al la bastono, ekiris al la caro. Petro, preminte per la polmo la radon de la tornilo, haltigis la turniĝadon, liberigis ŝraŭbojn de la fiksilo kaj ĵetis la pretan pulion en korbon, en kiu jam kuŝis kelkaj pulioj kaj aliaj etaj faraĵoj. Fiksinte per la ŝraŭboj novan platon, la caro turnis sin al Ievlev kaj dum kelkaj momentoj, kvazaŭ ne rekonante, fiksrigardis al li, poste liaj mallongaj, turnitaj supren lipharoj tremeris, la okuloj eklumis en subrido, kaj li demandis:

— Nu, kio? Ĝojas vi, verŝajne? Unufoje divenis, kaj nun por vi ne estos brido? Preĝu al Dio por Izmajlov.

Ievlev silentis, hele, rekte kaj sentime rigardante en la okulojn de Petro.

— Ruzaj vi estas kun Teodoro! — same kun subrido daŭrigis Petro. — Tuj kiam mi foriris el Arĥangelsko — vi tuj atakis Urquhart-on. Ruzaj, diabloj...

Li per la mano de malsupre abrupte tiris supren la radon, forsvingis rabotaĵon de sur la tornomaŝino, sed ne plu tornis.

— Multe ruzaj. Do, ĉi fojon, verŝajne, vi pravas. Amare tio estas, sed vere, ke sendas oni al ni el eksterlando latronojn, tamen vi ne pensu, ke ankaŭ poste mi tiajn viajn aŭdacaĵojn lasos senpune. Negocistojn, kaj lertajn metiistojn de Rusio ne forturnu, eĉ se pri unu sola vi eraros — aliaj ne venos...

Silvestro Petroviĉ silentis.

— Oni skribas al mi, sendas petskribojn pri vi, sinjoro kapitan-komodoro, ke subpremas vi fremdlandanojn. Por kio vi tiel fie agas? Respondu!

— Ŝtelistojn, Siro, kaj malbondezirantojn al mia patrujo ĝis la vivofino mi subpremados! — per sonora pro streĉo voĉo prononcis Ievlev. — Sed bonajn gastojn, negocistojn, lertulojn, majstrojn mi ne nur ne ofendos, sed mem manĝigos, trinkigos, dormi kuŝigos kaj nenion avaros...

Petro abrupte tiris la kapon, snufis:

— Ho, Silvestro, arkon oni fleksas ne tuj, se vi tro forte premos — ĝi krevos.

— Por tio, Siro, mi pensas, sidas en la Arĥangelska vojevodeco bojaro — princo Aleksio Petroviĉ Prozorovskij. Li fleksi arkojn estas grandega majstro...

— Pri kio vi?

— Pri tio, Siro, ke ĉi vojevodo, sian fidelecon al vi pruvinte en pasintaj jaroj, nun...

— Kio — nun? — kriis Petro.

— Nun ne nur por vojevodo ne taŭgas, sed eĉ kiel oficiron

mi lin al mi ne prenus...

— Sed mi pri tio vin ne demandas! — kun kolera moko diris la caro. — Ĉu komprenis vi? Mi per mia propra kapo pensas, — kriis li furioze, — per la mia, kaj vi, konsilantoj, por mi ne necesas...

Li ree forturniĝis al la tornilo kaj komencis torni, forte premante per la piedo la pedalon. Ree ekkuris rabotaĵo, li deŝiradis ĝin ĉiam pli kaj pli trankvile, poste ekparolis grumble:

— Prozorovskij en la vojevodeco dum du jaroj sidas, kaj ankoraŭ dum du sidos. La vojevodo estas bona, de metiistoj Arĥangelskaj, kaj de komercistoj, kaj de fremdlandaj negocistoj, preskaŭ de la tuta Fremdlanda korto, petskribo estis sendita al ni en Moskvon, ke sidu princo Prozorovskij en la vojevodeco la trian jaron kaj la kvaran...

Silvestro Petroviĉ pro miregо preskaŭ aĥis. Ĉu por Prozorovskij estis sendita petskribo? Malklaraj estas faroj viaj, Dio... Do, tiam eĉ paroli ne havas sencon...

— Kial vi kun lambastono? — subite demandis Petro.

— Frostigis mi la krurojn, Siro, pardonu...

— Kial do vi estas griza? — ree demandis Petro.

Al Silvestro Petroviĉ tremeris la vizaĝo, li ne trovis, kion respondi. La caro ordonis eksidi. Ievlev ne distingis.

— Eksidu, se vi al lambastono apogiĝas, — fiksrigardante al Ievlev, ordonis Petro. — Jen ĉi tien eksidu, sur la benkon...

Ievlev eksidis, malfermis hokojn de la uniforma kaftano, elprenis el leda komplika paperujo la planon de la Novdvina

citadelo, dismetis antaŭ Petro. Tiu vokis Apraksin-on kaj Menŝikov-on kun Izmajlov, demandis, kiu ĉi planon faris, ĉu ne Rezen?

— Rezen, Jegoro.

— Ĉu fremdlandano?

— Fremdlandano, Siro.

— Do, vidu — fremdlandano, sed la plano estas bona!

— Fremdlandanoj estas diversaj! — trankvile respondis Ievlev. — Mi por tiu Rezen, Siro, se necesos — sur eŝafodon iros.

Petro ĵetis straban rigardon al Ievlev, turnis la lipharojn, alŝovis la planon al si pli proksime. Menŝikov el trans la dorso de Petro Aleksejeviĉ diris subite, ke kanonoj sur la turoj staras malĝuste. Apraksin prenis grifelon, ardezon, cirkelon, rapide kalkulis, kun miro balancis la kapon:

— Nu, Daniloviĉ, via okulo estas vere falka. Vi tuj ekvidis.

Silvestro Petroviĉ, sidante apud Petro, montradis per grifelo sur la plano, kiel kio estos, kie estas pulvotenejo, kie kuŝos kuglegoj, kie estas domo por vunditoj, de kie povas iri helpo. La caro aŭskultis atente, snufante per la pipo, kapjesadis kun aprobo. Ievlev subite pensis: «Li vere estas tuta en laboro. Kiam io estas kun racio kaj koro farita — li estas la unua amiko».

— Kio mankas? — demandis Petro kaj ree ĵetis flankan rigardon al Ievlev: liaj brunaj okuloj nun arde brilis.

— Multo, sinjoro bombardisto, mankas! — suspirinte, diris Ievlev. — Ĝuste por tio mi alveturis...

La vizaĝo de la caro iĝis strečita, sed kiam Menŝikov diris, ke estas kanonoj de malnova modelo, kiujn eblas doni al Arĥangelsko, Petro interrompis lin:

— Silvestro fatrason ne bezonas. Al li estos pli malfacile, ol al ni. Pensi necesas, sinjoro Menŝikov, pensi!

Kaj li mem enpensiĝis por longe, frapetante la pipon al la polmo, kovrita de kaloj. Poste li komencis rememori, kie estas kanonoj, ankoraŭ ne alveturigitaj en Moskvon. Menŝikov kaj Apraksin al li sugestadis, li penseme kapjesadis. Ievlev skribadis per plumo sur paperfolio: haŭbizoj el Voroneĵo, mortiroj el Novgorodo. Izmajlov kliniĝis al li, flustris en la orelon:

— Ne timidu, Silvestro, petu kun plio, li marĉandos...

Silvestro petis kun plio kuglegojn, fusilojn, muskedojn. Menŝikov koleriĝis, diris per ofendita voĉo:

— Ne donu vi al li, bombardisto, mi petas. Li elŝiras kun haŭto! Ĉio al li malmultas! Ankaŭ mi muskedojn kaj fusilojn naski ne estas instruita. Poste, eble, mia respondeco estos per klabo. Via parolo estas mallonga: se io mankas — Saĉjo kulpas.

Petro Aleksejeviĉ ordonis:

— Silentu!

Kaj demandis de Ievlev:

— Ĉu monaĥojn, la Diajn servantojn, vi skuis? La sonoriloj estas ankoraŭ nenio, la karnodikaj diabloj laboru — ĉe mi oni ĉie laboras...

— Oni skribis kontraŭ Silvestro petskribojn, — diris

Menŝikov. — El la Nikola-Korela monaĥejo skribis, el la Pertominska, — mi al vi, sinjoro bombardisto, tiujn petskribojn eĉ ne portis. Kvazaŭ li ĉiujn al laboroj pelis, eĉ la anĝelan rangon ne indulgis. Skribas, granda estas peko, estos li anatemita...

La caro ekridis, frapis Ievlev-on al la ŝultro, diris base:

— Pri tio ne dubu, Silvestro! Ĉi grandan pekon mi sur min prenos, depreĝos vin. Mi, fraĉjoj, por ĉi respondoj antaŭ la Sinjoro estas sanktoleita de la Konstantinopola patriarĥo. Al la laboroj ĉiuj iru, por ni ne nur monaĥoj laboras, sed eĉ monaĥinoj, por ili labori en ŝvito estas multe pli bone, ol la diablon amuzi. Kaj preĝejajn servojn ili poste servos, ĝuste tiel al ili diru, al viaj monaĥoj. Kio pri nia Atanazio?

Silvestro Petroviĉ rakontis pri Atanazio, pri tio, ke li sendis al tiu la Neŭtonajn librojn, pri tio, kiel admonadis la ĉefepiskopo skismanon Teodozon Forĝiston.

— Ĉu admonis?

— Ĝis la Butersemajno ĉi Forĝisto ĉiam la morton atendis, kaj en la unua tago de la Butersemajno ordonis doni al si glaseton da vodko, eltrinkis, flaris la manikon kaj ekiris al mi en la Kanonan korton kanonojn gisi.

— Ĉu bona majstro?

— Avida je laboro, lertulo mirindega! — respondis Silvestro Petroviĉ.

Petro rideris gaje, diris:

— Bona viro estas Atanazio, tre bona. Se li estus pli juna, mi Aleksaĉjon forpelus puŝe reen vendi pirogojn kun leporaĵo,

kaj Atanazion — ĉi tien prenus. Kun li estas pli trankvile, ĉu vere, Danilovič?

— Por kio kun leporaĵo? — bruligante la pipon, diris Menŝikov. — Mi tiam iĝus ĉefepiskopo. Ankaŭ ili ne malriĉe, mi pensas, vivas...

Tiel, en ŝercoj kaj afero pasis la tago, venis krepusko, ekbluis trans la fenestroj de la palaca ĉambro. Dum Silvestro Petrovič per grifelo sur ardezo desegnadis la ŝanelon de Dvino kaj klarigadis la vojon, per kiu la sveda eskadro iros al Arĥangelsko, — cara kuiristo Velten alportis grandan paton da ovaĵo kun ŝinko, stanajn glasetojn sur pleto, kruĉeton kun vodko. Petro drinkis la unua, bone grakis, per kulero ekmanĝis la ovaĵon, estis videble, ke li estas tre malsata. Kaj ree Ievlev miris, kiel estas detruita la rito de manĝado, komenciĝinta de la bizancaj imperiestroj. Sidas kvar viroj, skrapas per kulero ovaĵon, kaj en la aero de la palaca antikva halo ankoraŭ staras apenaŭ kaptebla odoro de olibano, de malnova vakso, de aroma varmo, kiu iam venadis de kahelitaj fornoj. Kaj ŝajnas, ke ĉio nuna estas sonĝo, ludo infana, kiel en la antaŭlonge pasintaj jaroj, kiam bruadis la ludsoldatoj en la Faceta aŭ Kruca palacoj kaj en timo rigidiĝadis: jen aperos monaĥo, la sekiĝinta fingro kolere minacos — for, malpiuloj, for...

— Hej, Velten, ankoraŭ ovaĵon! — kriis Petro. Verŝis po dua glaseto; proksime rigardante al Ievlev, diris:

— Nu, Silvestro, estu sana! Vi bone faras, mi ne povas riproĉi. Penante pri via laboro, pensu: ne solan Arĥangelskon mi gardas, ne en ĝi sola estas la prakaŭzo de la sangoverŝado...

Per gesto li alvokis al si ĉiujn kune, ruze palpebrumis.

Apraksin, Izmajlov, Menŝikov, Silvestro Petroviĉ kliniĝis pli proksime. La lipharoj de la caro minace moviĝis:

— Nu, se vi disbabilos!

Kaj li tuj mildiĝis:

— Ne knaboj, mi pensas, viroj ŝtataj, sed tamen iam iu ne retenas sin...

Aleksandro Daniloviĉ alpremis la pugnojn al la brusto, terure ĵuris je Dio, ke ne vidu li la Dian mondon, mortu per aĉa morto. Petro ne permesis fini la ĵuron, interrompis:

— Donu grifelon!

Izmajlov alŝovis kandelingon pli proksime. La caro, mordetante la lipojn, rapide, kurbe desegnadis sur la ardezo liniojn, metadis rondetojn. Silvestro Petroviĉ, fiksrigardante ĝis doloro en la okuloj, rekonis Arĥangelskon, la Blankan maron, la Solovkiajn insulojn, la bordon, vilaĝeton Njuĥĉon. De Arĥangelsko al Solovkioj ekkuris maldikaj vojetoj. Petro, hastante, parolis:

— Per la floto, kiu estas konstruita en Vavĉugo kaj en Solombalo, ni iros al la monaĥejo, kvazaŭ por preĝo. Akompanos nin laŭ la rango soldatoj en nemalgranda kvanto; spionoj supozos, ke ni foriris adori restaĵojn de sanktaj Zosimo kaj Sabateo. Sed el tie, el la Solovkia klostro, kiam la blankaj noktoj finiĝos, ni direktos nin al la Njuĥĉa salfarejo — jen ĝi, sur la bordo.

Petro per la grifelo montris, kie troviĝas la Njuĥĉa salfarejo.

— El tie ĉi al Pul-lago tra marĉoj per novaj vojoj... Poste al Voĵmosalmo... Estos kun ni du fregatoj, ĉi tie ni tiujn fregatojn

surakvigos kaj sur akvo laŭ Vig-lago kaj laŭ rivero Vigo al vilaĝo Telejkino. Riveretoj ĉi tie estas — Muroma kaj Mollaga... Poste tra marĉoj kaj arbaroj al Poveneco...

— Noteburgo! — ekkriis Silvestro Petroviĉ.

— Vi divenis! — subridinte, respondis Petro. — Vere Noteburgo, la antikva novgoroda Oreŝko, nia Oreŝko, de niaj praavoj. Se ni dismordos ĉi nukson[101], staros ni per firma piedo por ĉiam en la Balta maro...

— Ankoraŭ Nienŝanco[102]! — diris Apraksin.

— Multo ankoraŭ, — forviŝante per la polmo la desegnaĵon de sur la ardezo, prononcis Petro, — multo, sed ĉio nia, kaj Koporjo, kaj Jamo, kaj Korelo, kaj Ivangorodo. Kiel muro ekstaris la svedoj sur la Balta maro, kaj nun ankoraŭ Arĥangelskon ekdeziris fermi. Tio ne estos. Frato nia Karolo ĉiam revas esti Aleksandro, sed mi ne estas Dario...

Mallonga subrido tuŝis liajn lipojn, la okuloj ekbrilis, li demandis:

— Ĉu eblas tiel rezoni post Narvo?

Kaj li respondis al si mem:

— Post ĝi ni ĝuste tiel rezonas! Kiu vidis, kiel regimentoj niaj staris en kvadrato kaj, ĉirkaŭbarinte sin per artileriaj ĉaroj,

---

101 Oreŝko (Орешек) laŭvorte signifas «nukso» en la rusa. Oreŝko estis antikva rusa fortikaĵo ĉe fonto de Nevo, fondita en 1323 de novgorodanoj. Ekde 1612 ĝis 1702 ĝi apartenis al Svedio sub nomo Nöteborg («nuksa urbo»). Nun ĝi nomiĝas Ŝliselburgo (de germana Schlüsselburg — «ŝlosilurbo»), kiel ĝin nomis Petro. *(trad.)*.

102 Nienŝanco (germ. *Nyenschanz*, svede *Nyenskans*, laŭvorte «Neva skanso»; en la rusa ial fiksiĝis la germana prononco) — sveda fortikaĵo, fondita en 1611. Nun la loko estas sur la teritorio de Sankt-Peterburgo *(trad.)*.

rebatadis atakojn de la svedoj, tiu alie rezoni ne povas. Kiu vidis, kiel preobraĵenskanoj niaj kun la semenovskanoj el ĉi malfeliĉa batalo eliradis, tiu post paso de tempo pri nenio alia, krom pri la venko, eĉ pensi ne aŭdacas. Je ĝi do ni drinku glaseton, kaj al Moskvo tempas iri...

La glasetoj malforte tintis super la tablo, super la pato kun restaĵoj de la ovaĵo. Eltrinkinte, Petro rapide demandis:

— Kaj kio, Silvestro? Eble, sendi al vi Daniloviĉ-on por helpo?

Menŝikov ekĝojis, ekflustris al Ievlev en la orelon:

— Petu, petu, faros ni tie al Karlo ĉagrenojn, li ekscios, kiom kostas nun la rusa plago. Petu, ni tie tiajn aferojn faros...

Sed Petro ŝanĝis sian opinion:

— Vi sukcesos tie kun Atanazio, Daniloviĉ ĉi tie necesas.

— Jen, necesas, — grumblis Menŝikov. — Sed ĉiam li minacas min puŝe forpeli...

Kiam tute malheliĝis, ili ekrajdis al Moskvo. La kaleŝo de Aleksandro Daniloviĉ treniĝis fore malantaŭe laŭ ĉirkaŭvojo, al la koĉero estis ordonite ne trafi al la okuloj de Petro Aleksejeviĉ...

La caro estis kvieta, pensema, silente pririgardadis ekdormintajn en nokta nebulo densajn apudmoskvajn arbaretojn. Ĉe la bariero li mem kontrolis la gardantaron, base, sen kolero, riproĉis pro io la gardan oficiron. Dum tiu longe senkulpigadis sin, Apraksin diris al Ievlev:

— Mi ne povas koncentri miajn pensojn. Ne estas ŝerco — Noteburgo, Nienŝanco, la Balta maro. Repreni tion, pro kio

ankoraŭ Ivano Baziljeviĉ[103] kontraŭ la Livonia ordeno militis, eliri al la maro...

Petro el mallumo vokis:

— Silvestro!

— Ĉi tie mi estas, Siro...

— Vi kun mi veturos...

Ili turnis sin en mallarĝan, odorantan je brulanta vilo strateton, poste la ĉevalaj hufoj ŝmacis sur marĉeto, poste la hufferoj tintis je ŝtono. Petro ne ĉirkaŭrigardis, ne diris eĉ sonon. Tiu vojo estis kaj konata kaj nekonata, dum la vojo Ievlev ion malklare rememoris kaj ree forgesis. Kaj tute rememoris nur ĉe granda, sen interspacoj, pordego, kie malhele flagris olea glima lanterno kaj same, kiel tiam, kiam estis torturata Ŝaklovitij[104], estis pasanta unu fidela gardisto. Tio estis monaĥeja oksa korto, en kies subplanko jam en la sangaj tagoj de la ekzekuto de la pafistoj estis urĝe konstruita torturejo. Ĝi plu restis ĉi tie — la malbenita regno de la princo-cezaro...

Kun angoro en la koro Ievlev deĉevaliĝis en la profunda malhela korto, donis la kondukilon al soldato, ekiris post la caro. Krutaj ŝtupoj, apenaŭ prilumitaj per vaksa kandelo, kondukis malsupren en la subplankon de la monaĥejaj bovistoj, en malaltan brikan kelon, kie plu iris la sama terura laboro, konstanta kaj kruela, tiu, pri kiu Silvestro Petroviĉ penis ne

---

103 Ivano IV la Terura *(trad.)*.

104 Teodoro Leontjeviĉ Ŝaklovitij (mezo de 1640-aj – 1689) — rusa ŝtata aganto, bojardumaa sekretario, estro de la Pafista kancelario, subtenanto kaj favorato de carino Sofja Aleksejevna. Estis ekzekutita en 1689 pro komploto por carino Sofja cele de mortigo de Petro I. *(trad.)*.

rememori kaj ne pensi, kaj pri kiu tamen pensadis konstante kaj eĉ vidis en sonĝoj. Kiel en tiuj antaŭlonge pasintaj tagoj, por bojaroj dekstre apud la pordo estis metitaj du benkoj kun drapaj trivitaj kaj grasmakulitaj kovriloj, kaj inter ili staris malplena tornita seĝo kun satena lanuga dorso, metita por la caro. Same kiel tiam, estis brulantaj kandeloj en kandelingoj, sed da kandeloj estis malpli multe kaj neniu bojaro, krom la princo-cezaro, frostosenteme envolvanta sin en peltmantelon. Li sidis sola sur larĝa benko, kaj sekretarioj estis skribantaj ĉe la tablo. Romodanovskij eĉ pli grasiĝis dum tiu tempo, nun liaj ŝvelaj vangoj pendis ĉe la mentono. Ekvidinte la caron, li ne leviĝis de sia loko, sed nur kliniĝis flanken, tamen la sekretarioj riverencis ĝis la tero, same kiel torturistoj, da kiuj estis multe — ĉirkaŭ dek. Sur la pendigilo en duonmallumo iu pendis disŝovite — vila, maljuna, rigardis per malklaraj pupiloj. Ĉe la muro sur mato estis malforte ĝemanta duonnuda, svelta, blankkorpa viro. Asistanto de torturisto, sidante kaŭre apud li, estis almetanta al liaj vundoj foliojn de malseka brasiko. Alia viro, ekvidinte la caron, penis krucosigni sin per la dekstra mano, sed ne sukcesis kaj krucosignis per la maldekstra. La torturisto, lerta rufa ulo, skoldis lin:

— Kion vi faras, ventkapulo? Ĉu vi freneziĝis?

Kuracisto-fremdlandano en ŝtrumpoj kaj ŝuoj, en bela, de delikata drapo kaftano, estis fumanta pipon kaj klariganta ion al la ĉefa torturisto Bazilo Leontjeviĉ, kiu estis konsentanta kun la kuracisto kaj subridanta, montrante etajn, fortikajn, tre blankajn dentojn...

Petro, ne eksidante sur la seĝon, preparitan por li, apogis sin dorse al la pordofosto kaj trankvile, per sia raŭketa baso

demandis:

— Nu?

— Kion diri, patro, — ondiĝante per tuta sia ventro, respondis Romodanovskij, — dum ioma tempo ripozis la latronoj, ĉiam pri la sia persistas. Mensogas ili galimation, ni muelas akvon. Batalas mi kun la olda monaĥo, antaŭe ni ne povis, ne estis li eksmonaĥigita, sed nun oni lin eksigis, tamen senutile...

Petro, movinte la rigardon al la pendigilo, demandis:

— Ĉu vi estas monaĥo Dij?

La maljunulo silentis.

— Kiu vi estas? — montrante la dentojn, kriis Petro.

— Surdiĝis li, patro, — diris Romodanovskij. — Jam post la unuaj torturoj surdiĝis. Nun li estas entute kiel stumpo, kaj ankoraŭ la kapo iris promeni. Babilas nesciate kion...

— Do iun alian pendigu! — kun malplezuro ordonis la caro. — Por kio tiele tempon pasigi...

La pulio knaris, la maljunulon oni mallevis sur la teron, elprenis liajn manojn el la maŝoj, kovritaj per felto, sur mato portis lin trans tinon kun akvo. Sed li tuj el tie elrampis kaj komencis sendeŝire pririgardi la caron. Maldika, ĝibnaza sekretario afereme leviĝis, piedbatis la maljunulon, kiel hundon, per la boto kaj ree eksidis sur sian lokon. La torturistoj levis la blankkorpan viron kaj komencis enŝovi liajn fortajn, muskolajn, grandajn brakojn en la torturan ŝeklon.

— Kiu estas tiu ĉi?

— Pafisto de la Koniŝĉeva regimento Miĉjo Nejedin.

Iniciatinto de la tuta afero, li la unua komencis instigi, ke princon-bojaron Prozorovskij-on oni sur lancojn levu...

Silvestro Petroviĉ aŭdis, kiel la pafisto nelaŭte, sed severe diris al la torturisto:

— Dion timu! Ni ĉiuj mortos...

— Mi ja al Dio fidelas, — per gaja rapida parolo respondis Bazilo Leontjeviĉ. — Mi ja, fraĉjo, ne perfidis...

Kaj, kraĉinte al la polmoj, li apogis sin per la boto al la trabo kaj ektiris. Miĉjo forte kunpremis la dentojn; liaj brakoj subite elturniĝis, li eligis longan krion, lia korpo, pendiĝinte, tuj iĝis pli longa.

— Parolu! — ordonis Romodanovskij.

La pafisto ekparolis rapide, lia parolo alternis kun mallongaj ekkrioj, sur la lipoj vezikiĝis salivo:

— Kontraŭ la germano ni pro tio en Azovo faris, ke kiam al urba laboro oni nin pelas, tiam la germano nin senkulpe batas kaj senmezure laborigas. Estis dirite, ke la germanon, kiu de princo-vojevodo Prozorovskij super ni kiel rigardanto estis starigita, puŝi en la foskavon, pro tio ekirus kontraŭ la bojaroj kaj aliaj latronoj la unua ondo. Post tiu afero la bojaron mem sur lancojn oni levus...

— Knuton al li! — ordonis Petro.

Sed al knuto la afero ne venis. La pafisto ekspiris ofte kaj ekpendis en la ŝeklo. La torturisto, bruligante la polmojn per la ŝnuro, rapide mallevis Miĉjon sur la teron, dormema helpanto verŝis akvon el ĉerpilo al lia brusto kaj al la vango. La pafisto ekmoviĝis, ankoraŭ ĝemis. La fremdlandano-kuracisto diris

laŭte:

— Ne plu. Ne hodiaŭ. Nur morgaŭ.

— Dum la tuta hodiaŭa tago mi tiele turmentiĝas, — plendis Romodanovskij. — Kio estis antaŭe dirita, pri tio ili ankaŭ nun insistas, kaj novan ni neniel povas ricevi...

Dum oni estis preparantaj al la pendigilo tiun viron, kiu krucosignis sin per la maldekstra mano, Romodanovskij diris al la caro:

— Mi ne scias tute, patro, kion fari. Instruu, kara. Rabas bojaraj infanoj, murdas en Moskvo kaj en grandaj vojoj kiun ili deziras — kaj riĉan, kaj malriĉan, kaj negociston, kaj soldaton, kaj kampulon, kaj metiiston. Kiu tion faras, estas sciate, — Nikiĉjo Repnin kun siaj servutuloj, Zubov, Alatorcev, sed la popolo timas kontraŭ ili denunci: ili murdos, kaj la bienon bruligos, kaj la homojn per sabroj mortigos...

— Preni ĉiujn ĉi tien en la torturejon, — ordonis Petro. — Je mia nomo. Kun ili ankaŭ — Tolstoj-on Baĉjon, Doĥturov-on, Karandejev-on, Repnin-on Saĉjon. Ankoraŭ jen: princon Ivanon Ŝejdjakov-on, hundon favan, pro tiaj raboj ekzekuti morte sur la Marĉo...

Princo-cezaro riverencis flanke.

— Kiam kun tiuj ĉi vi finos?

— Kun kiuj tiuj ĉi?

— Kiuj bojaron Prozorovskij-on sur lancojn levi deziris...

Romodanovskij pensis, kuntiris la brovojn:

— Ne tuj, patro. Ni ĉiam prenas kaj prenas. En tio hasti ne taŭgas...

— Tio estas vero...

Kaj, kuntirinte la brovojn, li abrupte malfermis antaŭ si la pordon. De la sojlo vokis:

— Ievlev!

Silvestro Petroviĉ sur la mallarĝa ŝtuparo atingis la caron. Tiu turnis sin al li, diris malmilde:

— Ĉu vi vidas, kio okazas? Ili diras: la germanon puŝi en foskavon, kaj de tio komenciĝos ribelo. Kaj Prozorovskij-on sur lancojn, ĉu?

Ievlev silentis.

— Ĉu tiel? La unua ondo kontraŭ la bojaroj kaj aliaj latronoj? Ĉu tion ekdeziris vi kaj Apraksin?

En la korto Petro silente, facile enseliĝis, suspiris per plena brusto, ordonis al Ievlev ne postiĝi. Kiam ili estis alrajdantaj Kremlon, ekaŭdis malproksiman voĉon de patrolanto, kiu laŭ malnova moro, kiel ĉe avoj kaj praavoj, elkriadis de sia loko:

— Sankta Dipatrino, savu nin!

Al li respondis alia — de la Flor-Laŭra pordego[105]. Kaj laŭ la ĉeno de patrolantoj ekkuris:

— Sanktaj Moskvaj miraklistoj, preĝu Dion pri ni!

Kaj kvazaŭ eĥo ruliĝis, ekbruis sur Kitajo kaj Blanka urbo, laŭ ĉiuj vojoj, irantaj de Moskvo, longe, kante:

— Glora urbo Moskvo!

— Glora urbo Kievo!

105 Nomita laŭ sanktaj martiroj Floro kaj Laŭro (laŭ apuda preĝejo). Nun ĝi nomiĝas la Pordego de Kristo la Savanto, la ĉefa pordego de la Moskva Kremlo. *(trad.)*.

— Glora urbo Suzdalo!

— Glora urbo Smolensko!

— Glora urbo Novgorodo!

— Glora urbo Vologdo!

— Glora urbo Arĥangelsko!

Kaj ree respondis Kremlo per voĉoj de deĵorantaj patrolantoj:

— Sankta Dipatrino, preĝu Dion pri ni!

5. Longe post la noktomezo

Petro kun krako malfermis la fenestron, en la malaltan sufokan halon tuj penetris malvarma nokta aero, ŝanceliĝis fajretoj de kandeloj, prilumante malhelajn murpentraĵojn de la volboj: paradizajn birdojn, ekzotajn florojn. Apraksin-on, Menŝikov-on kaj Izmajlov-on la caro forliberigis, al Silvestro Petroviĉ ordonis iri kun li...

Tuj kiam ili eksidis, knaris la pordo, maljunulina voĉo ion ekflustris. Petro leviĝis, per grandaj paŝoj eliris el la halo. Silvestro Petroviĉ enpensiĝis. En la animo kuŝis pezo, la terura aspekto de la grizhara maljunulo Dij, rigardanta el post la tino, kvazaŭ fiksiĝis antaŭ la okuloj. Kaj, kvazaŭ respondante al liaj pensoj, ekparolis de sur la sojlo Petro:

— Kiom malbone! Okazas nun ĉiam pli ofte, ke nubo de duboj fermas nian penson, Silvestro. Kion fari? Ĉu ne ĝuu la faranto frukton de la arbo, de li plantita? Aleksaĉjon Menŝikov-on mi nomas frato, sed li ŝtelas senmezure. Sen domaĝi la

propran vivon mi laboras, sed ĉu vidas mi bonon de iuj? Ĉiuj estas malamantoj, kontraŭuloj, nur solan bastonon timas. Ĉu obskuro de duboj niaj ne estos forpelita per faroj?

Al Silvestro Petroviĉ spasmis la gorĝo. Petro rigardis al li per sekaj, hele brilantaj, elturmentitaj okuloj, kvazaŭ atendis respondon.

— Malfacile! — apenaŭ aŭdeble, flustre prononcis la caro.

Li skuis la kapon, ekparolis rapide, afereme:

— Post Narvo malvenko ĉe Arĥangelsko, Silvestro, estos por nia honoro neeltenebla. Multon ni faris, al multo ni pretas, sed bezonas ni, ho, bezonas nun venkon. Kaj ni bezonas kaj la svedo bezonas, por ke li ne tro fieru en estontaj tempoj, por ke ankaŭ li pensu: kaj kio, se oni lin batos? Tion iuj ne komprenas, pensas, stultaj, ke kvazaŭ havas ni multajn tiajn urbojn, kiel Arĥangelsko, ne granda estos ofendo. Sed Izmajlov komprenas, — ĝuste pri tio ni hodiaŭ konversaciis. En la reĝlando dana oni konsolas sin per espero, ke ĉe la unua malvenko la svedoj ilin pli bone traktos. Ĉu komprenas vi, pri kio mi parolas?

Ievlev silente klinis la kapon.

— Ĉu vi esperas?

— Mi esperas, Siro.

— Ĉu firme? Ĉu vi scias, ke ankaŭ la anglo al vi nun rigardas — atendas vian malgloron?

Silvestro Petroviĉ ree klinis la kapon. Petro rigardis al li atente, streĉite.

— Ĉu ĉion vi rakontis al mi hodiaŭ en Preobraĵenskoje? Se

ne ĉion — parolu ĉi tie!

Ievlev leviĝis, dense fermis la pordon, eksidis tute proksime al Petro.

— Pensas mi, Siro, fari tiel: svedaj militistoj sen piloto en la Dvinan buŝon eniri ne povos. Piloton ili bezonas preni Arĥangelskan, ne alie. En ĉi terura ludo necesas trovi homon, kiun mi fidus, kiel... kiel vin, sinjoro bombardisto, kaj tiun homon sendi sur malamikajn ŝipojn. Tiu rudristo-piloto, ne domaĝante sian vivon, kondukos la kapan, tio estas flagan ŝipon de la svedoj kaj sidigos ĝin sur malprofundaĵon sub la kanonojn de la Novdvina citadelo, kie la malica eskadro estos de ni senkompate pafmortigita, por ke la latronoj eĉ la vojon forgesu en niajn akvojn...

— Tio estas bona! — ekkriis Petro. — Brave, Silvestro. Sed kie vi trovos la homon?

— Da tiaj homoj en Rusujo estas ne unu kaj ne du, Siro! — firme respondis Ievlev. — Ekzistas tiaj homoj. Vi mem hodiaŭ parolis pri la regimentoj — la Preobraĵenska kaj Semenovska...

— Sed se... li perfidos? Homo ne estas regimento!

— Ne povas tio okazi. Mortigi lin malice oni povas, kaj por tio mi metas kaŝitan ĉenon. Se oni mortigos mian rudriston, se ne sukcesos ni kun la kanonoj, estos la ĉeno sub akvo etendita, fermanta la Dvinan buŝon. Kaj se ili eĉ la ĉenon trarompos — forpelas mi la tutan ŝiparon, konstruitan laŭ via ukazo en la urbo Arĥanĝela, en malproksiman sekretan havenon. Ne trovos ĝin tie la svedo...

— Ankoraŭ kio?

— Ankoraŭ la urbon Arĥanĝelan, monaĥejojn najbarajn —

ĉion mi armas per kanonoj kaj duonkanonoj, per muskedoj kaj fusiloj. Ĝis tranĉiloj, Siro, ni batalos. Eĉ se elŝipiĝos vivaj la svedoj, tiam nur tiom malgranda manpleno, ke estos facile ĝin eltranĉi, kaj ili eĉ ne pensu pri venko... Ni ne fordonos Arĥangelskon.

Silvestro Petroviĉ eksilentis. Petro ne deŝiradis de li la okulojn. La pordo knaris, en la halon denove enŝoviĝis la maljunulino, la vartistino de la carido, vokis:

— Patro, Petro Aleksejeviĉ...

Petro ekkuris, frapante per la ŝuoj. Revenis baldaŭ, kvazaŭ heliĝinte:

— Aleĉjo mia antaŭnelonge ekmalsanis, de la mateno kiel flamo brulis. Nur nun la febro ĉesis. Li ŝvitiĝis, petis acidan lakton, ekdormos, se donos Dio...

Li verŝis por si kvason, avide eltrinkis. En anguloj de la halo senĉese knaradis griloj, nokta vento ŝanceladis fajrojn de kandeloj, trans la malfermita fenestro kante, laŭte, forte elkriis nokta patrolanto:

— Sankta Dipatrino, indulgu nin!

— Do, veturu! — tremerinte pro nokta humideco, diris Petro. — Kun Dio, Silvestro! Kaj memoru, firme memoru: Prozorovskij por vi estas fidela helpo, lin fidu, mi intence vin hieraŭ en la kelon veturigis, por ke vi mem vidu — li estas firme fidela al ni. Kaj ankoraŭ memoru, pri kio ni antaŭ nelonge parolis: se vi ne enlasos nun la svedojn al Arĥangelsko — estos ni en proksimaj jaroj ĉe la Balta Maro. La unua kaj la dua estas firme ligitaj. Veturu senprokraste, jam hodiaŭ. Kanonojn, kuglegojn, grenadojn, ĉion, kion ni skribis, ni

komencos jam morgaŭ urĝe sendi al vi...

Silvestro Petroviĉ kliniĝis al la mano. Petro ne lasis, mallarĝe, per eta kruco krucosignis Ievlev-on, kelkfoje ripetis:

— Kun Dio, kun Dio, kapitan-komodoro. Urĝiĝu! En Arĥangelsko estu severa kun fuĝuloj, kun latronoj, kontraŭ pafistoj vin gardu, multaj estas inter ili ne sen kaŭzo, kvankam ne estas kaptitaj. El ĉi tie, el Moskvo, ili estas forpelitaj, ili ĉiuj tie vivas. Observu, se vi ne sukcesos — tio estos via malfeliĉo. Se mi povos, mi mem venos al la batalo, sed apenaŭ. Do sukcesu sen mi. Skribu pri viaj aferoj...

Kun mateniĝo Ievlev kaj Jegorĉjo elveturis al la Jaroslavla elirejo. Super la Moskva ĉirkaŭaĵo, kien povis atingi okulo, staris rozkolora varma nebulo. Jegorĉjo ekscitite rakontadis, kion li vidis hodiaŭ, kie estis, kiel firme decidis por si iĝi poste navigisto. Silvestro Petroviĉ streĉite aŭskultadis voĉojn de patrolantoj, gardantaj malproksimajn alirojn al Moskvo:

— Glora urbo Jaroslavlo!

— Glora urbo Vologdo!

— Glora urbo Arĥangelsko!

Jegorĉjo miris:

— Jen! Ĉu pri ni ili krias, Silvestro Petroviĉ?

— Pri ni! — severe konfirmis Ievlev. — Pri ni, Jegoro. Ke estas glora la urbo Arĥangelsko. Firme teni nin ni devas...

— Kaj kio? Ja ni tenos! — respondis Jegorĉjo. — Kiel ne teni? Kanonojn ni havos, kuglegojn havos, fusilojn same. Nun ni sukcesos...

Ievlev silentis, mienis morne, severe rigardis al la vojo, kiu

estis rekte kaj glate forkuranta antaŭen — malproksimen, foren al la nordo...

Ĉapitro sesa

> Se por pizo frosto ne estus, ĝi super palisaro kreskus.
>
> *Proverbo*

1. Kuracisto Loftus

Nova dana kuracisto Loftus trovis la vojevodon princon Prozorovskij-on ne en Arĥangelsko, sed en Ĥolmogoro, kie la princo ekmalsanis kaj kien transloĝiĝis lia tuta familio kun ĉiuj hejmanoj, parazitoj, servistoj kaj duoncento da pafistoj, kiuj devis konstante gardi la personon de la severa bojaro.

Kancelariano Gusev — longnaza kaj ruza, kun anasa, plonĝanta irmaniero — akceptis la fremdlandan gaston ĝentile, kaj la kuracisto sen prokrasto estis allasita al la vojevodo mem. La princo, elturmentita de malsanoj, estis kolere ĝemanta sur benko. Lia kapo estis ĉirkaŭligita per viŝtuko kun malvarma oksikoko el kelo, la nudaj piedoj staris en tino kun varmega kvaso. La edzino de la vojevodo, grasa kaj kriema princino Eŭdokia, per strida voĉo estis persvadanta la vojevodon ne ofendi ŝin — manĝi kokinon en salakvo. Aleksio Petroviĉ forinsultadis kaj ĝemadis.

Farinte riverencon al la princo kaj kisinte la manon de la princino, Loftus esprimis bedaŭron, ke li venis tiel malfrue, ne atinginte la malsanon en ties komenco mem, sed ke ankaŭ nun li esperas fari per sia arto al sinjoro granda vojevodo almenaŭ ioman helpon, des pli, ke en la tuta ĉirkaŭaĵo nun, ŝajne, ne troveblas klera kuracisto...

— Unu estis — ni forpelis! — severe diris la princo. — Ne pri sia afero li okupiĝis. Kaj fremdlandanoj fuĝas, multaj jam fuĝis. Kiuj per maro foriri ne povas — tiuj al Vologdo iras, kaj de tie al Moskvo, al Kukujo. Kaj varojn kun si fortiras, ĝismorte timiĝis...

Loftus faris nekomprenantan vizaĝon, palpebrumante, lia rigardo ŝajnis al la princo senruza.

— Sed ĉu vi vere nenion scias? — demandis la vojevodo.

— Kion povas scii mi, simpla kuracisto? — demandis responde Loftus.

— Militi kontraŭ ni intencas reĝo Karolo, jen kion! — diris la princo. — La urbon Arĥanĝelan almiliti. Li bruligos per fajro, metiistojn buĉos, kaj min li ŝajne pendumi minacis sur pendumilo je la kolo, kun tuta mia familio...

Apude en la loĝoĉambro ekplorĝemis princino Eŭdokia; iom poste base ekplorkriis post ŝi la princido, bojara filo Borĉjo; post la princido ekploris ankaŭ la maljunaj fraŭlinoj — princidinoj. La vojevodo per la piedo batis la tinon kun kvaso, kriis severe:

— Huŝ for, damnitaj!

La princino kun la idoj eksilentis, la princo ekparolis, iom post iom pli fidante la ĝentilan fremdlandanon, kiu scipovis aŭskulti kun atento, scipovis ĝustatempe jesi, scipovis kunlamenti, balanci kun riproĉo la kapon. Al tia homo estas agrable rakonti...

Loftus suspiradis kun kunsento, memorfiksadis, kion diras la princo, parolis mem, ke la tuta Eŭropo nun timas la damnitan svedon, ke liaj sampatrujanoj danoj eĉ ne esperas venki reĝon

Karolon. Aŭgusto, la pola reĝo, certe, same ne eltenos premon de la sveda armeo...

Ili konversaciis longe, varme. La kuracisto faris konkludojn: ĉi tie oni la svedojn timas morte, la vojevodo pro timo ŝajnigis sin malsana, penetri en Dvinon por ŝipoj de lia reĝa moŝto ne postulos, certe, multajn penojn, la ŝipkonstruejoj estos forbruligitaj, la urbo estos neniigita...

— Antaŭe homoj ankoraŭ dubis — ĉu venos svedaj militistoj, — diris la vojevodo. — Sed nun eĉ duboj ne estas. Ni ricevis leteron el Stokholmo, de fidela homo, ke oni serĉas ĉie ŝipestrojn, kiuj konas maran vojon ĝis Arĥangelsko...

— Ĉu leteron?

— Ŝajne, sekretan leteron alportis fuĝinta de svedoj galera sklavo...

Loftus balancis la kapon, okupiĝis pri la sano de la princo. La malsanon de la vojevodo li trovis ne tre danĝera, sed grava kaj okazinta pro densiĝo de sango en la ĉefa kaj defluiga kapaj vaskuloj. Laŭ opinio de la kuracisto, la princo devis tuj kuŝiĝi en liton kaj pensi pri nenio malgaja, ĉar densiĝo en vaskuloj okazas nur pro nigraj pensoj. Krom tio, la kuracisto trovis, ke en la vojevodo akumuliĝis pro afliktoj multe da sulfuro, hidrargo kaj salo, kiuj kaŭzas melankolion, facilan febron kaj influas la duumviron — la spiritan elementon de la homa esenco, troviĝantan en la stomako. Estas difektita ankaŭ la arkeo — la viva elemento. Antaŭ ĉio la kuracisto rekomendis al la princo bruligi en si flogistonon, alivorte la spiriton de fajro, pro kio fariĝas ĉio sekvanta, kaj poste aparte kuraci la kapajn vaskulojn, la melankolion kaj la meteorismon.

Ju pli parolis la kuracisto, des pli laŭte oĥadis la vojevodo. La vortoj, kiujn li ne komprenis, sugestis al li estimon al sia propra malsano, kaj la afabla voĉo de la kuracisto esperigis pri fina resaniĝo.

Dum la tuta tago la kuracisto faradis por la princo tinkturojn kaj balzamojn, kaj ankaŭ esploradis la familianojn kaj hejmanojn, kiuj same suferis pro diversaj malsanoj. Princino Eŭdokia suferis pro pikdoloro sub la brako, la princino-patrino — pro malbonaj sonĝoj, la princido — pro orelzumado, la patro de la vojevodo, princo Petro Vladimiroviĉ, — pro longaj hikadoj kaj pro timo de musoj. Ankaŭ kontraŭ la timo de musoj la dana kuracisto faris dekoktaĵon.

Tagon poste la kuracisto aranĝis por si komision de la princo-vojevodo: viziti la Novdvinan citadelon kaj esplori tie, kia estas sano de la laborantoj, ĉu ne enportos ili en la urbon mortigan epidemion aŭ iun alian infektan malsanon. Por Loftus oni preparis velboaton de la vojevodo, kaj ĉe serena mateniĝo li kun favora vento direktis sin laŭ Dvino al Arĥangelsko.

Ĉi tie la fremdlandano faris vizitojn al siaj samlandanoj, loĝantaj en la fremdula parto de la urbo en gastejoj — sub aspekto de negocistoj el Bremeno, Holstinio, Danio aŭ Nederlando. Ceremonie prezentinte sin, li atendadis momenton, kiam li restadis kun la necesa al li homo sola, el siaj manoj montradis al tiu dokumenton, konserviĝantan en kapsulo, kaj per naza voĉo faradis kelkajn demandojn. La samlandanoj respondadis malsame, iuj detale, iuj koncize kaj seke. Sed en ĉiuj respondoj sentiĝis unu afero: neniu havis grandan kredon pri sukceso de la ekspedicio de subadmiralo Gyllenstierna.

En ŝtona angla gastejo malfidema negocisto Martus postulis la dokumenton en siajn manojn, nehaste tralegis, poste demandis:

— Do, vi estos anstataŭ *herre* Des-Fonteines?

— Jes, nun mi en ĉio anstataŭos lin.

Martus balancis la kapon:

— *Herre* Des-Fonteines estas saĝa homo. Anstataŭi lin estas malfacile.

Loftus kuntiris la brovojn, kaŝis la kapsulon kun la dokumento kaj komencis fari demandojn. Martus respondadis mallonge, ne rigardante al la kuracisto.

— Kia homo estas pastro Fritsch? — demandis Loftus.

La negocisto respondis, ke la pastro estas homo kuraĝa, rapida en decidoj, sed, bedaŭrinde, li estas ĉi tie nelonge kaj ne komprenas ankoraŭ multon.

— Ĉu li kunvenigis la paroĥanojn en tiuj ĉi tagoj? — demandis la kuracisto.

Martus respondis, ke li kunvenigadis plurfoje. Hieraŭ, ekzemple, post la diservo pastro Fritsch deklaris sin estro de sekreta fremdlanda brigado kaj legis liston de ĉiuj tiuj rusoj, kiuj devas esti neniigitaj en la urbo la plej unuaj.

— Ĉu granda estas la listo?

— Granda. En ĝi estas tiuj, kiuj ne obeos al la krono eĉ sub timo de perdo de la vivo.

— Kiuj do ili estas?

— Kapitan-komodoro Silvestro Ievlev. Pro lia kaŝo patro

Fritsch deklaris mortan ekstermon de tuta tiu familio, kie oni lin trovos. Plue — kapitano Krikov. Post ili — subleŭtenanto Pustovojtov kaj lia frato Jegoro. Devas esti ekzekutitaj ŝipaj majstroj el rusoj — la maljuna Ivano Kononoviĉ kaj la alia, Koĉnev. Plue iras tiuj majstroj, kiuj lernis sian arton de Ivano kaj Koĉnev... Ankoraŭ, la ĉefo de la pafistoj, oficiroj — Merkurov...

La kuracisto ne finaŭskultis:

— Ĉu vi havas sekretan signon por viaj domoj, por ke en konfuzo de tritaga rabado ne suferu havaĵo de la homoj fidelaj al la krono?

La negocisto respondis, ke sekreta signo estas, same kiel estas ankaŭ sekreta vorto.

— Kiom da ŝipoj nun estas konstruataj en la ŝipkonstruejo de Arĥangelsko?

— Ses grandaj ŝipoj, *herre*, estas preskaŭ finitaj. En Vavĉugo estas konstruataj ankoraŭ kvar. Por tiuj ŝipoj la rusianoj havas matrosojn, kiuj flaris pulvon ĉe Azovo kaj posedas la maran arton perfekte.

Loftus subridis kun dubo:

— Ĉu multaj eksterlandaj majstroj laboras en la lokaj ŝipkonstruejoj?

— Nun tre malmultaj, *herre*. La rusoj konstruas siajn ŝipojn propraforte.

— Ĉu vi havas armilojn? — demandis Loftus.

— Jes, ni havas.

— Ĉu multe?

— Ni havas pistolojn, duonarkebuzojn, tranĉilojn, pulvon. En la kirko ni havas du kanonojn. En la Kanona korto servas kiel ĉefmajstro nia bona paroĥano Reger Ripley. Li penos tiel elekti kanonojn kaj kuglegojn por ili, ke en la decida horo la moskvianoj ne sukcesos pafi eĉ unufoje...

— Kiu nun komandas la pafistojn en la urbo?

La negocisto kuntiris la brovojn:

— Simono Ruĵanskij, *herre*. Se kolonelo Snivin ne transirus ĉe Narvo al la sveda armeo, sed servus ĉi tie, ĉio irus multe pli bone, ol nun...

— Eble, vian Ruĵanskij-on eblas subaĉeti?

— Nek Ruĵanskij, nek Ievlev, nek Krikov, nek Pustovojtov-oj estas subaĉeteblaj.

Loftus silentis iom.

— Do, vi emas supozi, ke la rusoj rezistos?

— Jes, *herre*.

— Ĉu vi havas propran homon en la citadelo?

— Havas, *herre*. Inĝenieron Georgon Lebanius-on. Sed li estas forte timigita kaj tenas sin kun ekstrema singardemo. Ĝis la nuna tago respektinda pastro Fritsch ne povas ricevi de li desegnojn de kanonaro de la fortikaĵo kaj de la Marka insulo...

— Pro kio do inĝeniero Lebanius iĝis tiel singardema?

— La moskvianoj iĝis aliaj, *herre*. Ili estas malpli fidemaj, ol estis antaŭe. Senintence elboatiĝinta ĉe la citadelo fiŝkaptisto Henriko Swenberg ĝis nun suferas en prizono. Kaj eĉ defendo de la vojevodo al nenio helpis, kaj la vojevodo malŝparis

multajn fortojn por liberigi la tute senkulpan suferanton.

— De kie oni ĉi tie eksciis pri la estonta invado? — demandis Loftus.

Martus levis la ŝultrojn:

— Ekzistas diversaj onidiroj, *herre*. Sed plej ofte oni diras pri rusaj kaptitoj, fuĝantaj el Svedio kaj Estlando. Ili alportas informojn, akiritajn en Stokholmo...

— Tio al ili ne helpos!

— Dume helpas. Ili ageme prepariĝas...

Pri la vojevodo la negocisto esprimis neglekte: la tuta urbo scias, ke la vojevodo estas malkuraĝulo. Per siaj postuloj de koruptaĵoj, depagoj kaj ŝtelado de la fisko li faris al si malbonan famon. Antaŭe ĉi tie estis vojevodo Apraksin, sed la caro postulis lin en Voroneĵon — konstrui ŝipojn. Apraksin kunprenis el Arĥangelsko multajn rusajn ŝipkonstruistojn kaj maristojn-pomorojn. Nun tiuj, kiuj batis la turkojn ĉe Azovo, revenis hejmen; ilin, bedaŭrinde, ne timigas la onidiroj pri estonta veno de la sveda eskadro. La vojevodo devus konduti pli saĝe, ĉar tiel li nur malutilas al la krono: se caro Petro deziros anstataŭigi lin kaj sendos ĉi tien homon kuraĝan kaj ageman, kia estis, ekzemple, Apraksin, espero pri venko de la svedoj entute ne restos.

— La trupoj de la reĝo neniigos la urbon en ajna okazo! — akre diris Loftus. — Venko al ni estas antaŭdestinita de la Providenco, kaj mi ne konsilas al vi enmiksiĝi en intencojn de la superaj fortoj!..

Martus pigre subridis:

— Mi estas homo de afero kaj parolas pri afero! — diris li en tono, kiu ŝajnis al la kuracisto impertinenta. — Se ni al ĉiuj niaj aferoj almiksados la Providencon kaj la superajn fortojn, tiam ni eĉ ne bezonos pensi pri io ajn, ĉar anstataŭ ni pensos la superaj fortoj. Lia reĝa moŝto intencas per sia ekspedicio neniigi la rusajn ŝipojn, detrui la ŝipkonstruejojn kaj per tio ĉesigi ĉiajn komunikiĝojn de la rusoj kun Eŭropo. La moskvianoj estas avertitaj kaj bone komprenas, per kio minacas la invado. Ĝis kiam ni opiniu ilin infanoj? Mi estas ĉi tie delonge, bone konas ilin kaj diras al vi, nur hodiaŭ ekvidinta la urbon: kiel ajn ni prepariĝu kaj kiom ajn patro Fritsch parolu al ni diversajn gravajn vortojn, la afero nin atendas treege malfacila, kaj ties rezultoj dependas ne nur de la volo de la Providenco, sed ankaŭ de nia racio.

— Kion do vi proponas? — incitiĝante, demandis Loftus.

— Mi rekomendas trovi rimedon, kiu ebligus la floton de lia reĝa moŝto per ruzo, sed ne per batalo eniri en la buŝon de Dvino, ankriĝi kaj ekposedi la urbon.

— Mi vidas, ke vi ne kalkulas je la fortoj de la floto de lia reĝa moŝto?

— Mi scias, kiel prepariĝas al la batalo la rusoj. Ĉiam kaj en ĉio mi estis konsenta kun *herre* Des-Fonteines.

Loftus leviĝis. Li estis incitita.

En la korto laboristoj estis fosantaj grandegajn kavojn, metadis en la angulojn po fosto, kovradis per tabuloj. La kuracisto komprenis: por la tempo de tritaga rabado la negocistoj, ne esperante al siaj sekretaj signoj, intencis kaŝi ĉi tien la varojn.

— Niaj matrosoj divenos! — diris li, dezirante ĉagreni Martus-on. — Tri tagoj estas granda tempo. Ĉu vere ili kredos, ke en tia korto, kiel via, nenion eblas trovi...

— Por tiuj, kiuj ne kredos, ni trovos ankaŭ kuglon! — respondis Martus.

Sur la placo surĉevala heroldo, tenante en la mano bastonon kun lada dukapa aglo, estis elkrianta ukazon de la vojevodo al metiistoj, ŝipistoj, negocistoj kaj fiŝistoj: en la fortreson, kiu estas konstruata nun sur la Lapominka insulo, neniu iru sub minaco de vivoperdo...

Martus akompanis la gaston ĝis la Resurekta kajo.

— En la fortreson! — ordonis Loftus al la remistoj.

Ili interrigardis.

— Mi diris — en la fortreson! — ripetis la kuracisto.

— En la fortreson al ĉiuj iri estas malpermesite! — diris la rudristo, denskorpa, mornaspekta homo. — Jen la heroldo rajdas, krias...

Martus trankvile staris sur la bordo, atendis, kiam debordiĝos la velboato.

— Al mi de la vojevodo mem estis ordonite esti en la fortreso! — kriis Loftus. — Ĉu vi aŭdas, kampulo? De la princo-vojevodo, jen de kiu al mi estis ordonite esti en la fortreso...

La rudristo sendecide staris iom, interŝanĝis kelkajn vortojn kun la remistoj, depuŝis la pobon de la velboato per hokstango. Loftus svinge gestis al la negocisto per la mano. En la velo ekflirtis vento...

2. Nikeforo

Ili malĉifradis la leteron duope — Ievlev kaj la pafista estro. Silvestro Petroviĉ laboris rapide, lerte, facile, la kolonelo pro peno ruĝiĝis, implikiĝis en literoj. Ievlev estis devigita doni al li pipon — li fumu kaj ne malhelpu.

La tabelo kuŝis maldekstre de Ievlev: litero b konformis al z, c — al v, ĉ — al t, d — al ŝ. Ievlev skribadis per sia firma skribmaniero strangajn vortojn — necesis restarigi la ĉifraĵon en ties origina formo, tiel, kiel ricevis la paperon la bagnuloj en Stokholmo. Post tiam ĝi estis kaj en akvo, kaj rufa makulo de sango disfluis sur ĝia rando, kaj sala ŝvito de bagnulo korodis multajn vortojn.

— Jen kiele, — diris Ievlev kaj legis: — «Diĝol zohal hozĥge feĝ nacaf ĵahohol ŝuŝeĵ ĉgi ĵal tiul ĵuhe vehĉ ŝeĵ...»

La kolonelo estis palpebrumanta, siblanta per la pipo.

— Kiel ĝi en nia lingvo rezultos? — diris la kapitan-komodoro kaj komencis substitui literojn. Poste legis: «Ŝipoj bonaj nombre sep havas kanonojn dudek tri, kaj ĉiuj kune cent dek...»

La pafista estro snufis, glatigante la lipharojn. Silvestro Petroviĉ tradukadis plu. Al la pordo oni frapis, li kriis:

— Mankas tempo, poste venu, se necesos...

Li finskribis la mesaĝon, legis ĝin al la pafista estro. Tiu ankoraŭ snufis, pensis, post paŭzo, ne rigardante al Ievlev en la okulojn, diris:

— Jen kio, Silvestro Petroviĉ... kiel mi tion pli bone esprimu... eble, vi forgesis...

Ievlev, divenante, pri kio ekparolis la maljunulo, forturniĝis: estis dolore vidi kaj la emocion kaj la konfuziĝon de Simono Borisoviĉ.

— Nin estas nun ordonite ne fidi, — severe kaj malgaje diris Ruĵanskij. — Ni ja ĉi tie, en Arĥangelsko, estas ne laŭ nia deziro, sed laŭ la cara ordono, pli malproksime de Moskvo, abomenulojn for de antaŭ la okuloj...

— Sed vi ĉiuj ja iam furiozis sufiĉe, ĉu, Simono Borisoviĉ?

— Ĝi estas vero, ĉio estis...

— Nu?

— Ja ĝuste pro tio mi parolas, sinjoro kapitan-komodoro, ke fidema vi estas kun mi, sekretan leteron jen legis, konversacias kun mi ofte, longe. Gardu, ke ne estu pro tiu simpleco via kun mi kaj aliaj pafistoj malvarmigo el la supro mem. Ni, kara mia, ne estas pardonitaj, ni pro niaj pekoj estas ekzilitaj, pri tio ne forgesu...

Silvestro Petroviĉ kuntiris la brovojn, mallonge suspiris, respondis decide kaj eĉ severe:

— Mi pensas, vi stultaĵon diras, Simono Borisoviĉ. Mi estas militisto, ne al la princo-cezaro servas, ne al la Preobraĵenska kancelario, sed al patrino Rusujo. Ke vi, la pafistoj, furiozis iam — pro tio ja la sango pafista estis verŝita senmezure. Sed nun ni atendas la svedan invadanton. Vin persone, dankon al Dio, kaj ĉe Azovo homoj vidis, kaj ĉe Narvo vi honeste batalis. En la antaŭaj jaroj vi sabradis ankaŭ tatarojn kaj aliajn malamikojn, — kiel do mi min kontraŭ vi gardu, se vi vian vivon ne domaĝis, kiam mi eĉ ne naskiĝis? Kaj plu pri tio ni ne parolos, ĉar ne eblas nian militistan aferon fari, se ĝi estas

farata sen fido al la plej proksima fronta najbaro. Ĉu tiel?

La maljunulo ne trovis, kion respondi; ruĝiĝinte, li adiaŭe riverencis, forveturis en la urbon.

Fortresa soldato alportis urĝan leteron. Silvestro Petroviĉ rompis la sigelon, legis noton de suboficiro Ĥodiĉenkov, senditan el Oloneco. La estro de limgarda posteno estis skribanta el Kondušo, ke svedaj militistoj nombre pli ol mil venis al paroĥo Salmio, de kie ili iros al Oloneco bruligi, pendumi kaj rabi. La svedoj estas gajaj, malfeliĉon ne atendas, intencas iri marŝe, preni en posedon de reĝo Karolo Karelion kaj aliajn riĉajn lokojn. Fine de sia letero Ĥodiĉenkov petis doni al la senditoj kiom eble plej bonan pulvon, fusilojn, inklude novmanierajn, kaj aliajn militajn aĵojn, por doni lecionon al la svedo kaj ne lasi lin trarompiĝi tra la limposteno.

Silvestro Petroviĉ enpensiĝis por nelonge, poste, parolinte kun la senditoj, mem iris en la arsenalon — dividi sian malriĉon kun la soldatoj de la suboficiro Ĥodiĉenkov. Ili dividadis longe kaj insultadis senkolere, al unu akranaza kaporalo tro plaĉis malgranda kupra kanoneto, li senĉese persvadadis Ievlev-on doni ĝin al la limposteno kaj tiel glatumadis la tubon, ke Silvestro Petroviĉ eĉ ridis. Li donis al Ĥodiĉenkov kaj pulvon, kaj fusilojn novajn kaj malnovajn, kaj aliajn militajn provizojn. La soldatoj foriris kontentaj, palpebrumante unu al la alia pri naiveco de la Arĥangelska kapitan-komodoro...

Forakompaninte la senditojn, dezirinte al ili gloran venkon super la latronoj, Ievlev trairis la fortreson, rigardis, kie kion oni laboras, parolis kun inĝeniero Rezen pri la homoj de Ĥodiĉenkov kaj eniris en domon, kie kuŝis fuĝinto de galero —

diafana, pura, senmova, kiel mortinto.

— Ĉu vi fartas pli bone, Nikeforo? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ja ĉio kiel estis. Nek pli, nek malpli bone. Evidente, venis la tempo...

— Kial? Vi vivos ankoraŭ.

— Ĉu vivos? — Li kviete subridis. — Ne, sinjoro, tempas. Sed vi sidiĝu, mi rakontos plu...

Jam dum tria tago li per glata voĉo, trankvile, severe estis rakontanta al Ievlev sian teruran vivon.

— Malfacile estas por vi, mi pensas?

— Kio nun estas malfacila? Ne arbostumpojn elradikigi...

Kaj li ekparolis nelaŭte, per glataj frazoj, kvazaŭ legante:

— Homo estas malica, sovaĝa kaj obskura, en sia kolero superas per ruzo la plej sovaĝan beston. Vendadis oni min el sklaveco en sklavecon ses fojojn, kaj neniam estis tiel, ke al mi iĝis pli bone, sed nur pli amara kaj terura iĝadis mia sorto. Foje en Turkio ne sukcesis mi gardi ŝafojn de mia sinjoro, ne vidis, kiel maliculoj ŝtelis la ŝafaron. Kaj tiam tiu, al kiu mi estis vendita post la Azova kaptiteco, ordonis al la urba ekzekutisto eltranĉi al mi la palpebron sur la dekstra okulo — por ke mi ne plu povu ne vidi. La ekzekutisto eltranĉis mian palpebron, kaj mia okulo sekiĝis. Restis mi kriplulo kaj vidas nun nur per la maldekstra...

Silvestro Petroviĉ ĵetis rigardon al la galera sklavo. Li kuŝis senmove, nur liaj lipoj estis moviĝantaj.

— Tiel oni faradis el mi ĉenhundon, sed ne faris, ĉar

senĉese esperadis mi reveni al mia loko, kie naskis min la patrino, kaj montri min al homoj, por ke vidu ili, kio estos kun ili, se venkos nin la svedaj latronoj...

La pordo en la ĉambron knaris, eniris filino de Ievlev Irenjo, alportis en kruĉo lakton por la malsanulo. La alia filino, malpli aĝa je unu jaro, Venjo, staris en la vestibleto, timis eniri. En ŝia mano estis du sekalaj flanoj kaj trinkokruĉo. Nikeforo forturniĝis de la knabinoj por ne timigi ilin per sia kripleco.

Silvestro Petroviĉ karesis la knabinojn, suspiris, imaginte por momento ilian sorton, se venkos la svedo, ordonis iri promeni. Irenjo prenis Venjon je la dika maneto, kondukis solide, imitante vartistinon...

En la vestibleto ĝentile tusis Semisadov, — hodiaŭ li estis la unua helpanto de Silvestro Petroviĉ pri ekipado de brulŝipoj. Kaj ankaŭ multo alia en la mara afero de la fortreso estis sur li...

— Kion vi deziras? — demandis Ievlev.

— Kornojn pulvajn mi intencis surverŝi per vakso, sed da vakso estas malmulte! — diris Semisadov. — Kion fari?

— Ni solvos, ankoraŭ estas tempo. Eksidu, aŭskultu!

Semisadov, frapante per sia lignaĵo, eksidis sur ŝtipon apud la pordo, bruligis la pipon, prepariĝis aŭskulti. Nikeforo silentis. En la korto de la fortreso estis frapantaj lignaj pezaj ŝtipbatiloj: enigadis fostojn en subtilan grundon. Kun fajfo zumadis longaj segiloj; interrompante unu la alian, kvazaŭ interparoladis hakiloj. Sub la malfermita fenestreto trakuris kun rimeneto sur la frunto, kiel ĉe laboristo, inĝeniero Jegoro Rezen, post li estis paŝanta per longaj kruroj alia inĝeniero —

veneciano Georgo Lebanius.

— Kio denove okazis? — demandis Silvestro Petroviĉ en la fenestreton.

La inĝenieroj ne aŭdis la kapitan-komodoron, nenion respondis. De Dvino blovis malvarmeta vento; masonistoj, metante baraĵojn, estis kantantaj longan negajan kanton.

— Nu, plu? — diris Ievlev.

Nikeforo ree kuŝiĝis sur la dorson, etendis la manon sen tri fingroj, prenis la trinkokruĉon kun lakto. Semisadov rigardis al li, sulkiĝante, kiel pro doloro.

— Kaj tie mi aŭdis sufiĉe pri tio, kiel ili militos kontraŭ ni kaj la tutan ŝtaton rusan prenos sub sian manon. Multe mi aŭdis: finos ili nin por eterne, por ke poste eĉ vortoj tiaj ne estu — «rusa homo»...

Semisadov suĉis la pipon, nelaŭte sakris.

— Vi prefere rakontu laŭ ordo! — petis Silvestro Petroviĉ.

Nikeforo komencis rakonti laŭ ordo, de la unua tago de sia kaptiteco: kiel oni vendis lin en Silistron, kiel el Silistro pelis kun aliaj sklavoj ĝis la urbo Bruĝo mem kaj kiel tie, promesinte bonan kaj liberan vivon, oni prenis lin kiel mariston sur anglan ŝipon de altamara navigado. La ŝipo estis tuta en kradoj, en sekreta holdo estis konservataj ĉenoj por homoj, sed por kiaj homoj — tion neniu sciis. Kiel evidentiĝis poste, la ŝipo apartenis al armatoro, kiu iradis al bordoj de Gvineo kaj al aliaj lokoj, kie loĝis negroj. Tiujn negrojn necesis subigi per trompo aŭ per pafado, kaj poste en lazoj venigi sur la ŝipon, kie oni ilin katenadis per ĉirkaŭkoloj kaj metadis en holdojn, kiuj ne havis eĉ unu fenestreton...

— Kio estas negroj? — demandis Semisadov.

— Nigravizaĝaj homoj, — diris Ievlev.

— Ĉu homoj?

— Kiel homojn oni ilin tute ne traktas, — plu diris Nikeforo, — kaj se iu ekscios, ke tia kaptito ekmalsanis, tiam por ajna okazo lin vivan oni ĵetas en la maron al ŝarkoj, por «la tutan varon ne malbonigi» — kiel ili ŝercas inter si. Okazadis ankaŭ, ke aĉetisto de la viva varo aĉetadis tiujn negrajn homojn de ilia negra reĝo kontraŭ bidkolieroj, kontraŭ speguloj malgrandaj, kontraŭ tranĉiloj, kontraŭ hakiloj. Poste la aĉetisto — laŭ ili armatoro — veturigadis la suferantojn mare en alian lokon. Kaj tiujn, kiuj restis vivaj, katenitajn kune, per skurĝoj oni peladis al bazaro, al homa merkato. Kun koleregaj hundoj sur ĉenoj tra la bazaro pasumadis iliaj bienuloj, nomataj plantistoj, kiuj elektadis por si sklavojn, laboristojn el negroj. Tiujn bazarojn mi por ĉiam ne forgesos. Se virino negra estas graveda — ŝi kostas pli multe: kiel kontraŭ unu kaj duono de homo por ŝi oni pagas. Kripluloj kaj malsanuloj kostas malpli, ilin plantistoj ne aĉetas, ilin aĉetas kuracistoj, por kuraci kaj vendi kontraŭ bona prezo.

— Kaj kion vi tie faris? — demandis Semisadov.

— Matroso mi estis, mi diras! — respondis Nikeforo.

Semisadov balancis la kapon kun riproĉo:

— Rusa viro, sed kiom da malhonoro sur sin prenis! — diris li severe. — Tiuj negroj, mi pensas, en sia lingvo juĝis: por kio vi al ni venis...

— Kontraŭ mia volo, sed ne mem! — kriis Nikeforo. — Nin oni ne demandis, kial vi riproĉas? Mi fuĝus, sed ĉu tio estas

facile farebla?

Ievlev rigardis en la fenestron, rememoradis, ke li mem aŭdis pri sklavovendado en Londono, en Hago, en Amsterdamo, en Pilao de tieaj ŝipestroj kaj negocistoj: en havenaj tavernoj kun ĝino kaj konjako malligiĝadis la langoj, la maristoj fanfaronadis pri siaj aventuroj, pri oro, pri gemoj, akiritaj en foraj vojaĝoj...

— Ĉu vi fuĝis poste? — demandis Semisadov.

— Trifoje mi fuĝadis, sed malsukcese, pro kio estis mi punita severege: unuafoje oni sidigis min en feran kaĝon, kaj tiun kaĝon trifoje de la ŝipa jardo oni mallevadis sur ŝnurego en la maron. Mi ne esperis resti viva. La duan fojon mi estis kondamnita de la angla armatoro al kilumado. Antaŭ vespera aŭroro en haveno Dovero oni traigis ŝnuregon sub la kilo de nia ŝipo de unu flanko al la alia. La armatoro mem kun pipo en la dentoj eliris sur la pobferdekon — rigardi. Antaŭ liaj okuloj oni alligis min per ĉeno al la ŝnurego. Sep anglaj matrosoj kun rido prenis ĉi ŝnuregon, ĵetis min en la maron kaj komencis treni sub la kilo. Kiel kaj kio estis — mi ne memoras. Oni rompis al mi la kruron, kaj mi perdis konscion...

Fuĝi mi sukcesis nur post duonjaro, en alia somero. En haveno Jarmuto vendis min germanaj matrosoj, ligitan, en sako, al svedoj. En Norĉopingo, en la sveda reĝlando, fuĝis mi, por iri tra arbaroj al Tornio, kaj el tie al Kovdo kaj Kereto. Tamen tiel ne fariĝis, sed kaptis min militistoj kaj pelis kiel sklavon al Granda Kupra monto, kiu estas en lando Dalarno, al minejoj, sub la tero fosi kupran ercon. De tie nin katenitajn oni sendis en Danemoron — al feraj minejoj. Por nutrado oni donadis buljonon hordean kaj flanon same hordean — por unu

mordo. Oni batadis per feraj bastonoj je fingro dikaj, tie mi iĝis sendenta. Renkontis mi tie rusojn, kaptitojn, kaj trovis por mi amikon — Saĉjon, li estis Kurska, de pafista regimento soldato. Kun li ni krucon kisis, ke ni foriros, ne vivos tiel. Kun li mi al galeroj trafis...

— Ĉu tie vi aŭdis pri Arĥangelsko?

— Pri Arĥangelsko mi, sinjoro, aŭdis pli frue, en urbo Gevlo, kie estis ekipata granda fregato. Tiu fregato, diris galeraj sklavoj, estas destinita por granda floto, kiu iros Arĥangelskon konkeri. Kaj tiam mi kaj Saĉjo petis iri al la fregato, esperante el ĝi elĵetiĝi, tamen oni nin ne prenis, sed nur knutis ĝis konsciperdo. Tamen la Sinjoro favoris nin, kaj nia galero iris en havenon Uleaborgon — ĝi veturigis tien iun personon. En la haveno fariĝis sur nia galero incendio kaj granda mortigo, multaj niaj pereis, kaj ankaŭ mia Saĉjo — mortis li en arbaro, en ŝtona ravino, post tago. Mortante, li donis al mi la leteron, por ke mi ĝin ĝisportu, se estos viva. Pri tiuj leteroj mi ankaŭ antaŭe aŭdis, bagnuloj ilin gardadis kiel la pupilon de sia okulo, sed mi vidi ilin ne havis okazon, kio estis tiuj leteroj. Tamen scias mi ĝuste, ke tiujn leterojn skribas niaj rusaj homoj, pro malica sorto trafintaj en la reĝlandon svedan. Al vi mi ankoraŭ diros: iu kolivanano[106] multan bonon faras, naskita de rusa patrino, kvankam Rusujon laŭdire li ne eĉ vidis. Aŭdis mi pri li, ke li estas taverna servisto kaj havas kuraĝon senmezuran. Ĉu vi pri li ne aŭdis?

Silvestro Petroviĉ nenion respondis.

— Ĉu vi silentas? Nu, tio, eble, estas prave, ke silentas...

---

106 Kolivano — antikva rusa nomo de Talino. *(trad.)*

— Ĉu vi enterigis Saĉjon? — demandis Ievlev.

— Enterigis, sinjoro, en la ravino, per ŝtonoj ĉirkaŭmetis la korpon de la ĵus forpasinta sklavo Dia kaj ekiris kiel pilgrimo ĝis la Sumaj ŝeroj mem. Al monaĥo de la Solovkia klostro mi malkovriĝis — de kie mi iras kaj ke leteron kunhavas kaŝitan. La prioro min benis kun tuta hasto iri al Arĥangelsko. Oni donis al mi velboaton monaĥejan kaj ĉi tien veturigis...

Nikeforo eksilentis. Semisadov ekstaris de sia ŝtipo, demandis, pensante pri alio:

— Kion do pri la vakso ni faros, Silvestro Petroviĉ?

La kapitan-komodoro skuis la kapon, forpelante malgajajn pensojn, same leviĝis. Ili eliris el la domo kune. Sidante sur perono, inĝeniero Rezen estis lunĉanta.

— Vi irus al Manjo! — diris Ievlev. — Ŝi manĝigos. Ĉu bone estas sekaĵon manĝi?

Rezen subridis, diris, ke ĝi taŭgas.

— Ĉu kanonoj el Moskvo venis?

— Fusiloj venis kaj muskedoj, da grenadoj du ĉaroj grandaj. Da kanonoj ankoraŭ estas malmulte.

— Ĉu fusiloj estas bonaj?

Rezen respondis, ke bonaj — por miro. Antaŭe tiajn oni ne faradis. Kaj la muskedoj estas bonaj, malpezaj, oportunaj, ne malpli bonaj, ol la Lieĝaj.

Semisadov estis fumanta flanke. Ievlev nelaŭte demandis Rezen-on:

— Kio pri la veneciano?

— Ja la samo! — respondis Rezen. — De la mateno li kriis al mi, ke li nepre devas esti en la urbo...

Malgraŭ tio, ke ili parolis en la germana, Silvestro Petroviĉ ankoraŭ mallaŭtigis la voĉon:

— Ne lasu, kiel ajn li bruu...

— Mi ne lasas! Sed tiel longe ne povas daŭri. Unu fojon mi ne lasis, ankoraŭ fojon ne lasis, poste same ne lasos...

— Al mi ordonu iri, se li krios... Ni iru, ferdekestro!

Semisadov ridetis — unu apogas sin sur bastono, la alia estas sur ligna kruro...

— Kial vi tro gajas? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Mi rigardis al vi kaj al mi. Jen ankaŭ vi estas kun bastono...

— Ne gravas! — diris Silvestro Petroviĉ. — La svedon ni venkos, tiam mi ankaŭ la bastonon forĵetos...

Sur fortresaj muroj knaradis neŝmiritaj pulioj, kanonistoj per ĉenoj trenadis supren korbojn kun kuglegoj por kanonoj, gispotojn kun pulvaj ŝargoj, afustojn. Pafistoj estis ŝanĝantaj gardantarojn sur la angulaj fortresaj turoj, sur la korto tondradis ĉaroj kun ŝtono, kun traboj, kun tabuloj. Barbaj masonistoj el Solviĉegodsko, ĉarpentistoj kaj lignaĵistoj el Mezeno, forĝistoj el Vjatko, terfosistoj el Ustjugo, Totjmo, el vilaĝoj kaj bienoj, fiŝistoj kaj bestoĉasistoj enbatadis fostojn, faradis embrazurojn, metadis baraĵojn, argiladis fornojn sub la fortresaj muroj, por en tiuj fornoj boligi peĉon, bruligi per ĝi la malamikon. Metiistoj el Arĥangelsko samtie, en la fortresa korto, riparadis kaj forĝadis nove hokojn por ŝipsturmado, lancojn, madzojn,

akrigadis matrosajn tranĉilojn kaj sabrojn. El la Kanona korto sur barkoj kaj boatoj oni senfine alveturigadis ĉion, kio estis tie: malnovan kaj novan, rompitan kaj netuŝitan. Ĉion oni ordigadis ĉi tie, — ĝi taŭgos en la estonta batalo...

En kalka polvo, en grincado de segiloj, en bruego, samtie, sub la fortresaj muroj, apud siaj edzoj, edzinoj luladis infanojn, manĝigadis ilin per supo, kuirita sur la samaj lignofajroj, sur kiuj la metiistoj fandadis plumbon kaj stanon, kantadis al la beboj malgajajn kantojn:

Baj-baj, baj-baj, Dio donu, estos gaj',
Donu pli rapide, donu ne inside,
Baj-baj, lu-lu, jam hodiaŭ ne vivu plu,
Morgaŭ estu vi en tombo,
Portos tien vin kolombo,
Por patrin' estos facile,
Kaj por vi estos trankvile,
Varme estos al kruretoj,
Bone estos al kapeto.

Semisadov balancis la kapon, kriis:

— Kion vi kantas, stulta kapo!

— Kaj vi min ne instruu! — kolere respondis la virino.

Semisadov diris al Ievlev nelaŭte:

— Tro suferas la popolo, Silvestro Petroviĉ. Ĉu eblus nutri pli bone?

— Sed kie preni la nutron? — demandis Ievlev. — En la maron fiŝistoj ne iras, ĉiuj estas por laboro enpelitaj, en la tuta ĉirkaŭaĵo oni ne plugis, ne semis...

— Mortas multaj, — ree diris Semisadov. — Febro mortigas, ankaŭ skorbuto. Se iu ekmalsanis — per ŝelo ne multe resaniĝos...

Silvestro Petroviĉ kunpremis la dentojn, iris, ne returniĝante al Semisadov. Apud la tenejo kun militaj provizaĵoj li diris:

— Venu al mi en la domon poste, mi donos monon, en Arĥangelsko en bazaro aĉetu tripon. Pli freŝan serĉu. Brasiksupon oni kuiros por la laborantoj...

Semisadov morne respondis:

— Ĉu tio helpos, Silvestro Petroviĉ? Nu, tagon aŭ du, kaj poste kio? Ree malsato? Ŝtelantoj abundas...

— Ni pendumados! — diris Ievlev. — La kapojn al ŝtelantoj hakos. Hodiaŭ ni ne povas ŝerci! Se troviĝis tia homo, kiu priŝtelas laborantojn, maŝon sur lian kolon, kaj fino...

Li elprenis el la poŝo grandan ŝlosilon, ordonis al gardisto deiri, malŝlosis pezan pordon. Semisadov fajfis per du fingroj, al la fajfo alkuris la teneja intendanto. Ili komencis mezuri restintan vakson. Dum ili mezuradis, Semisadov diris:

— Ĉiun ja ne eblas pendumi sur branĉo, Silvestro Petroviĉ. Se iu estas malbona kaj groŝojn ŝtelas — tiun pendumi estas simpla afero. Sed se iu por ŝtona palaco oron akiras — kiel lin kapti? Glita, mi pensas...

— Pri kio vi diras? — demandis Ievlev.

— Vi mem scias...

— Tro parolema vi iĝis, ferdekestro! — diris Silvestro Petroviĉ. — La lango tro longas...

— La popolo diras, ne mi sola! — subridis Semisadov.

— Sufiĉas! — ordonis Ievlev.

Semisadov eksilentis. Lia vizaĝo iĝis fermita. Kiam Ievlev foriris el la tenejo kaj liaj paŝoj mallaŭtiĝis malproksime, la intendanto diris flustre:

— Atentu, ke nian vojevodon oni, pardonu Dio, ne murdu iel. Koleras la popolo ĉie...

3. Ankoraŭ spiono!

Fortresaj gardantaroj staris supre kaj malsupre laŭ Dvino sur tuta longo de la insulo Lapominka, sur kiu estis konstruata la citadelo. En malfronto de la fortreso, tie, kie etendiĝis ŝlimaj marĉoj, en putraj valoj, Ievlev ordonis konstrui du gardoturojn. Tie tagnokte deĵoradis soldatoj, kiujn ekzercadis Atanazio Petroviĉ Krikov. Li ankaŭ estris la tutan gardon de la konstruado de la citadelo kaj sur la Lapominka insulo kaj sur Dvino, kie estis elektita konstanta gardantaro el matrosoj, kiuj havis kvar oportunajn por tia afero rapidajn boatojn. Fremdulojn al la fortreso ili ne allasadis senescepte. Se iu iris per remiloj sur akvo, ili ordonadis levi la remilojn, se per velo — el malproksime ili faradis avertan pafon — haltu! Sur fortresaj velboatoj, kiuj veturigadis el la urbo brikojn, ŝotron, hakitan ŝtonon, feron, kalkon, argilon, najlojn, batalajn provizaĵojn, estis malgrandaj identigaj vimploj, sed ankaŭ la vimplojn ili ne tro fidis, pridemandadis la rudristojn laŭnome, priserĉadis la ŝarĝon, deprenadis permesan etikedon. Nur tiam la ŝipo estis allasata al la bordo. Ankaŭ ĉi tie staris gardantaj matrosoj en trikitaj ĉapoj, kun sabroj, severaj kaj neparolemaj.

La velboato de la vojevodo aliris la Lapominkan insulon

nelonge antaŭ vespero, kiam tamburoj en la fortreso jam finis bati ŝanĝon de skipo por laborantoj. El malproksime kuracisto Loftus rimarkis nenion specialan: la citadelo estas granda, kun eksteraj bastionoj, kun batalaj turoj, sur unu el kiuj jam flirtis, klakante sub vento, mara flago. Poste trans betuloj videblis levponto, sur kiu navedis ĉarpentistoj kun hakiloj kaj de kie aŭdiĝis batoj de marteloj — forĝistoj estis strečantaj ferajn ĉenojn. Nenion pli Loftus sukcesis vidi, ĉar gardanta matroso sen ajna ĝentileco prenis lin per siaj krudaj fingroj je la nazo kaj turnis lian kapon al alia direkto.

— Tien rigardu, — ordonis li kun subrido. — Kaj al la fortreso ne rigardu — vi pekos!

Loftus stamfis, kriis, la matroso trankvile minacis:

— Ĉu vi insultos, malĝentilulo? En holdon mi vin sidigos, tie estas pli malvarme...

La kuracisto eksilentis. Super Dvino estis zumantaj kuloj, ili dolore pikadis. La velboato estis malrapide balanciĝanta sur la akvo, el la citadelo aŭdiĝis sono de trumpeto, poste ree ĉio eksilentis.

— Ĉu vi longe tenos min ĉi tie? — demandis la kuracisto.

— Sed ĉu via afero estas urĝa? — kompate demandis la matroso.

Loftus entuziasme klarigis, ke la afero estas treege urĝa, en la citadelo estas multaj malsanuloj, necesas ilin kristane kompati, faciligi iliajn suferojn. Krom tio, en la citadelo estas homo nomata Nikeforo — granda suferanto. La princo-vojevodo ordonis helpi...

— Kompatas vi niajn fratojn, certe! — sarkasme diris la

matroso. — Nur vin ni esperas...

Ĉirkaŭe oni malice ekridis. Loftus alpremis la manojn al la brusto, diris tekston el la Sankta skribo — pri la bonkoreco.

— Prefere ŝtopiĝu! — konsilis al li iu per kruda voĉo.

La kuracisto ofendite eksilentis, frapante kulojn sur la kolo kaj la vangoj. Tutan nokton li pasigis sub aresto en ligna budo, konstruita super Dvino mem. Li deziris trinki, sed akvon el tino, staranta sur benko, la kuracisto abomenis. Panon, kiun oni alportis al li, li same ne manĝis. Aliaj, kiuj estis arestitaj de la gardantoj, manĝis panon, trinkis akvon kaj kuŝiĝis dormi. Sed la kuracisto ne dormis, flustrante insultojn, kiujn li diros al la impertinenta kapitan-komodoro. Sed la insultojn diri li ne sukcesis.

Matene oni elkondukis lin al la oficiro. La kapitan-komodoro, sidiĝante en velboaton, diris al li, ke ĉi tie kuracisto ne havas aferojn, ke fremdlandanojn li ĉi tien ne enlasos tute kaj ke la kuracisto forgesu ĉi tien la vojon por eterne sub minaco de terura morto.

— Sed la princo-vojevodo mem direktis min al via moŝto! — en la angla ekkriis Loftus.

— Ĉi tie mi estas estro! — ruse respondis Ievlev.

— La vojevodo estas estro super vi.

La oficiro silentis iom, kun subrido rigardante al Loftus.

— Mi devas esti en la fortreso.

— Vi ne estos en la fortreso. Forveturu kaj forgesu la vojon ĉi tien, alie al vi estos tute malbone...

Kaj la oficiro turniĝis al la kampuloj, kiuj noktis kune kun

Loftus en la budo. La kampuloj riverencis malalte, la oficiro ordonis liberigi ilin. La kuracisto plu ne moviĝis de sia loko. Tiam la oficiro diris:

— He, knaboj, sidigu lin en la velboaton!

Du matrosoj de grandega alto aliris lin, prenis je la ŝultroj. Loftus, perdinte sinregadon, elturniĝis, deziris batali. Tiam oni puŝis lin pli forte. Lia peruko falis, la matrosoj kaj la kampuloj laŭte ridegis. De sur citadela turo la malhonoron de la kuracisto vidis inĝeniero veneciano Georgo Lebanius...

— Ho, moroj de moskvianoj! — diris li poste al Rozen. — Kiel ili agis, tiuj matrosoj, kun kompatinda kuracisto, veninta ĉi tien pro mizerikordo.

Jegoro Rezen mallarĝigis la okulojn, diris moke:

— Ĉi tie, sinjoro Lebanius, ĉiu fremdlandano estas spiono. Atendu, iam la kapoj falos de la ŝultroj, elĉerpiĝos la pacienco de la rusoj...

La veneciano levis la ŝultrojn. Jegoro Rezen senzorge zumadis kanteton pri du amantaj koroj, mezuradis per cirkelo distancon de la ĉefa kanona remparo ĝis la rivera ŝanelo, diris kvazaŭ interalie:

— Mirinda estas la homa naturo. Pro ajna kaŭzo ni pretas ĉiel insulti sovaĝecon de moroj moskviaj, sed kiu el ni miras pri tio, ke vendas kleraj niaj eŭropanoj animojn homajn? Antaŭ nelonge vi, al mia rakonto pri suferoj kaj turmentiĝoj de tiu galera kaptito, kiu kuŝas en la hospitalo, bonvolis esprimiĝi, ke vi ne vidas en lia sorto ion ajn rimarkindan; la rakonto pri vendado de negroj, kiun prezentis al vi la kapitan-komodoro, per nenio vin ŝokis. Sed tio, ke oni forpelis el ĉi tie kiel favan

hundon ankoraŭ unu senfaran kuraciston — afliktas vian koron...

Rezen ree ekfajfis, metis numerojn de kanonoj sur la remparo, netigis la desegnaĵon kaj, forgesinte ĝin sur la tablo, eliris en la fortresan korton. La veneciano ĵetis rigardon post li, enrigardis en la desegnaĵon, pensis iom, elprenis el la poŝo notlibreton en dika porkleda bindaĵo kaj, tenante ĝin en la manoj, komencis fari notojn per ansera plumo. En tiu ĉi momento Rezen neaŭdeble aperis en malalta fenestro. La veneciano ne rimarkis, ne atendis lin el tie. Rezen rigardis longe, kunpreminte la lipojn, kunmetinte la manojn sur la brusto, rigardis ĝis kiam la veneciano kaŝis la notlibreton.

Poste li trankvile eniris en la ĉambron, eksidis sur la benkon, etendinte la krurojn en fiŝistaj botoj, kaj komencis plenigi sian argilan pipon per nigra forta tabako. La veneciano estis desegnanta mallevan meĥanismon por ĉena citadela levponto.

— Donu al mi vian notlibreton en porkleda bindaĵo! — trankvile diris Rezen.

La veneciano komencis paliĝi.

— Mi bezonas vian notlibreton! — ripetis Rezen.

La veneciano faligis ortilon, lia vizaĝo iĝis cindrokolora. Ievlev en la pordo diris al iu, kiu venis kune kun li:

— Kaj sub la fenestron gardanton starigu. Por ke neniu ĉi tien venu!

La inĝeniero falis sur la genuojn. Li skuiĝadis kaj longe ne povis elparoli eĉ unu vorton. Silvestro Petroviĉ ne urĝis lin, atendis. Jegoro Rezen estis fumanta sian pipon, rigardis flanken.

— Ĉu kanona majstro Reger Ripley apartenas al via komunumo? — demandis Ievlev.

— Mi kaj li — jes! — diris la veneciano. — Li kaj mi.

— Kiu staras super vi?

— Tiu malestas. Li forveturis kaj ne revenis.

— Ĉu kuracisto Des-Fonteines?

— Kuracisto Des-Fonteines.

Silvestro Petroviĉ nehaste, folion post folio, trarigardadis la notlibreton de la veneciano. Jen estas desegnita cigno, tamen tio estas ne cigno, sed la Novdvina citadelo. Per rigardo de konstruisto li kaptis precizecon de notitaj ampleksoj: herbo — tio estas la norda, orienta kaj suda flankoj de la fortreso, kie oni fosas nun akvajn foskavojn. Jen ankaŭ larĝo de la foskavoj estas notita en la angulo de la paĝo — tri klaftoj. Jen dometo kun fenestrokadroj kaj ŝutroj — kvazaŭ bagatela bildeto, sed tio estas ne bildeto, tio estas la fortresa duonluno[107]...

— Por kio venis ĉi tien fremdlandano Henriko Swenberg? — demandis Ievlev.

La veneciano ne sukcesis respondi, tiel skuis lin tremo.

— Parolu! — kriis Silvestro Petroviĉ. — Parolu, aŭ mi mortigos vin tuj ĉi tie!

La veneciano ekparolis, plorante kaj singultante: li ankoraŭ nenion sukcesis sendi el tio, kio estas ĉi tie en la libreto. Aŭ preskaŭ nenion. Tre malmulte, ĉiuokaze... Henriko Swenberg estis arestita antaŭ ol intervidiĝi.

---

107 Duonluno — speco de fuorto en formo de angulo, starigita ekster fortikaĵo por regi pordon aŭ kurtinon (PIV) *(trad.)*

Ievlev aŭskultis ne interrompante, lia vizaĝo kun malmilda falto ĉe la buŝo estis speciale pala, la bluaj okuloj sendeŝire rigardis al la veneciano. Trans la malfermita fenestro Dvina vento estis levanta kalkon, en nuboj de kalka polvo kvar ŝtontajlistoj traportis sur viŝtukoj malkovritan ĉerkon, el kiu elstaris blonda barbeto de Gabĉjo Ĥlopotov, mortinta hodiaŭ en la fortresa hospitalo pro brusta malsano. Post la mortinto, plorkriante, kaptante la ĉerkon per la manoj, iris nudkapa virino — la vidvino, kuiristino de la brigado. Maljuna fortresa popeto, en verdiĝinta ornato, moviĝinta sur unu ŝultron, en skufio[108], malfirme metante la malsanajn piedojn, estis svinganta la incensilon kaj streĉe kantanta funebran preĝon. Kaj la vivo en la fortreso estis okazanta siavice — batiĝadis fostoj, ŝrikadis segiloj, tondradis marteloj de forĝistoj.

— Iru, Jegoro, mi ĉi tie sola sukcesos! — diris Ievlev.

Rezen eliris, ferminte post si la pordon. Ievlev plu aŭskultadis, ĉu alportos vento la maljunulan voĉon de la popeto, akompananta en la lasta vojo Gabĉjon Ĥlopotov-on. Sed pro ŝrikado de segiloj kaj tondrado de feritaj radoj en la korto jam nenio estis aŭdebla.

La veneciano plu parolis, — nun li ne povis halti.

— Jam en tiuj tempoj, kiam mi nur intencis veturi en la barbaran Moskvion, — aŭdis Ievlev, — jam tiam, kiam miaj proksimuloj ne konsilis iri al tiom danĝera vojaĝo...

Silvestro Petroviĉ, senmove rigardante al la veneciano, elprenis el la larĝa brusta poŝo pistolon, palpe ŝutis en la

108 Skufio — kapvesto, uzata de ortodoks-kristanaj klerikoj kaj monaĥoj: ronda, mola ĉapeto, kies faldoj kreas ĉirkaŭ la kapo krucan signon. *(trad.)*

kulason pulvon... La veneciano kankre ekiris al la pordo, kriis, svingis la manojn. Ievlev levis la manon, celis, liaj bluaj okuloj rigardis senkompate, kaj la veneciano subite eksilentis, komencis malleviĝi sur la genuojn...

La pordon oni abrupte tiris el la vestiblo, Ievlev ne sukcesis pafi. Per larĝaj paŝoj en la ĉambron eniris Krikov, ĉirkaŭrigardis, prenis la pistolon el la manoj de Silvestro Petroviĉ, donis al li trinki akvon. La venecianon oni forkondukis.

— Nur mirakle mi lin ne mortigis! — diradis Ievlev, trankviliĝante. — Mirakle! Barbara Moskvio, ĉu? Barbara! Pro tio, ke kaftanojn ni portas aliajn, pro tio, ke ni manĝas ne laŭ ilia maniero. Kaj kiu nin nomas barbaroj? Spiono, homo sen honoro kaj konscienco. Ho, Atanazio Petroviĉ, duoble ni nin gardu ol antaŭe, duoble, trioble, kvaroble. Alie — pereo...

Atanazio Petroviĉ silentis, aŭskultis, en liaj okuloj lumis simpatio.

— Laciĝis mi! — diris Ievlev. — Estas timinde ne kredi, sed necesas. Nun mi kuraciston forpelis, de la vojevodo kuracisto venis, mi ne kredis, kaj prave ne kredis. La veneciano konfesis: ĝuste la antaŭa kuracisto estis ĉe ili la estro... Ĉio ĉirkaŭe estas subaĉetita. Kaj niaj homoj ĉi tie mortas, nutri ilin ni ne havas per kio, nutromono mankas. Kion fari, Atanazio Petroviĉ?

Krikov silentis, lia vizaĝo same estis laca, nerazita; la botoj, la rajdpantalono, la mantelo — en koto.

— Kiel ni vivos do? — demandis Ievlev.

Krikov respondis ne tuj, rakontis, ke en la urbo estas

malbone, cirkulas tia onidiro, ke kvazaŭ la fremdlandanoj intencas kune kun la vojevodo princo Prozorovskij ĉiujn rusojn ekstermi, por tio ili siajn gastejojn ĉirkaŭfosas, novajn palisarojn metas, en sia preĝejo ekstertempe preĝas. Diras oni ankoraŭ, ke dumaano Larionov kun kancelarianoj sekrete homojn arestas kaj tiuj homoj sub torturoj aliajn homojn denuncas, la arestejo estas plena, kaj la Arĥangelska popolo atendas terurajn ekzekutojn. Diras oni ankaŭ pri la vojevodo, ke li intence fiŝistojn en la maron ne lasas, por ke ili fiŝon ne provizu, sed per kio oni sin nutru, se ne per fiŝo? Ĉevala heroldo senĉese tra Arĥangelsko rajdas kaj de la cara nomo krias vojevodan ukazon: en la maron por gardo kontraŭ svedaj militistoj neniu iru sub minaco de knuto, pendigilo kaj maŝo.

— Ĉu maŝo? — redemandis Ievlev.

— Maŝo, mi mem aŭdis, Silvestro Petroviĉ, per la propraj oreloj.

— Azovo damnita! — nelaŭte diris Ievlev. — Ekde tiam li tian potencon prenis, ekde Azovo...

Li krakis per la fingroj, leviĝis de la benko:

— Ni iru, Atanazio Petroviĉ, en la urbon. Viajn homojn prenu, kiuj estas pli inteligentaj. Kaj ankaŭ mi matrosojn prenos...

Krikov atendis ĉe la pordego de la citadelo. Ievlev eniris en sian domon, al la edzino. Manjo estis knedanta paston, la knabinoj ludis sur la planko kun ĉifonpupoj. Silvestro Petroviĉ brakumis la edzinon je la ŝultroj, rigardis en ŝiajn helajn okulojn, diris flustre, por ke la infanoj ne aŭdu:

— Kaj mi, Manjo, ĵus preskaŭ murdis homon...

La okuloj de Manjo rondiĝis, la brovoj timigite tremeris:

— Ĉu vi veron diras?

— Mi ŝercas, ŝercas! — rapide respondis li. — Sed nur la ŝercoj ne finiĝu malbone... Ho, Manjo...

4. Malfacila vivo

Ĉe la Resurekta kajo, ĉirkaŭbarita nun en atendo de svedaj militistoj per baraĵoj, sub minacaj tuboj de kanonoj ĉene staris pafistoj de vojevodo Prozorovskij, multaj kun arkebuzoj, iuj kun muskedoj. Estis komerca tago — laŭ Dvino estis irantaj barkoj, velboatoj, platboatoj. Albordiĝi estis permesite nenie, krom al la Resurekta kajo. Ĉi tie, en malvarmeto, staris tablo, ĉe la tablo oscedadis kancelariano Abrosimov. Unue Ievlev kaj Krikov eĉ ne komprenis, por kio estas starigita strikta gardo kaj kiaj krioj aŭdiĝas el la amaso de pafistoj. Ili aliris pli proksime, disigante, dispuŝante homojn kun timigitaj vizaĝoj. Kancelariano Abrosimov riverencis, klarigis, ke oni laŭvole barbojn ne fortranĉas, la bojaro ordonis hodiaŭ tranĉi per forto. Samtie sur la genuoj staris tajloro kun tondilo — tranĉadis kaftanojn super la genuoj, kiel estis dirite en la ukazo. Al la tajloro estis moviĝanta vico, la viroj suspiradis, unu nelaŭte plendis al Ievlev:

— Malbone estas, sinjoro. Kiu havas plenan monujon — tiu liberiĝos per pago, pagu pro barbo kaj pro kaftano kaj iru promeni, sed por ni estas pereo...

Matrosoj, dogansoldatoj estis morne rigardantaj al la viroj, al la plorantaj virinoj. Unu virinon pafistoj ektrenis per forto el

velboato, ŝi renversis la korbon; la cepaj bulboj, kiujn ŝi estis veturiginta al la bazaro, elŝutiĝis en la riveron. Viro en boato, ekvidinte, kio okazas, depuŝis sin per hokstango. La pafistoj ekkuris post li sur malprofundaĵoj, ektrenis lin je la barbo, la viro komencis batiĝi, al li oni ŝnuris la manojn.

— Ne laŭ bono vi faras, kancelariano! — kriis Ievlev. — Ne taŭgas tiel! Bone, mi trovos tempon, tiam ni parolos!

La kancelariano ofendiĝis, lia vizaĝo sulkiĝis, li ekparolis per akra, ploranta voĉo:

— Ne laŭ bono, sinjoro? Sed kiel laŭ bono fari, instruu! Kie monon preni por via citadelo? Nutromonon ĉu el Moskvo oni sendas? Al la Kanona korto kiu pagos? Ĉu Abrosimov kaj Gusev? Kaj kie ili prenu? Ne, vi atendu, vi la vorton diris, do vi respondon aŭskultu. Ĉu panmonon doni al pafistoj estas ordonite? Sed kie ĝin preni? Soldatoj, kiuj al la sveda militiro estis rekrutitaj — ĉu al iliaj infanoj kaj orfoj po dek kopekoj pagi necesas? Sed kie preni?

— Ŝtelu malpli! — diris Krikov. — Jen kiajn domojn vi ĉiuj por vi konstruis — palacojn, sed ne domojn...

Abrosimov suspiris:

— Kiu por Dio ne estas pekulo? Kiu por avino ne estas nepo?

— Jen, ne pekulo, tamen la peko ja tro grandas!

La kancelariano ree suspiris pente.

— Suspiru, suspiru, avina nepo!

Kiam ili preteris la kajon, Krikov diris penseme:

— Sed li ja ne mensogas, Silvestro Petroviĉ. Ŝtelado certe

estas, kion la vojevodo ne prenis — tion ili plukos, pri tio eĉ ne indas dubi, sed pri la citadelo, kaj la Kanona korto, kaj la panmono, kaj pri la orfaj kopekoj — ĉio estas ĝusta!..

Ievlev iris mallevinte la kapon, peze apogante sin sur la bastono.

— Mono ja tute mankas! — estis diranta Krikov. — Vi, kapitan-komodoro, en la urbo estas malofte, sed en la bazaro nun, ĉu vi scias, kia mono cirkulas? Oni dishakas moneron je kvar partoj — jen al vi pago. Kaj anstataŭ arĝento ledajn markojn oni faris. Kiam Arĥangelskon oro aŭ arĝento atingas — tiam ĝi tuj malaperas: fremdlandanoj kaptas.

Subleŭtenanto Ĥagajo Pustovojtov kolere enmiksiĝis:

— Tute vivi ne eblas, sinjoro kapitan-komodoro. Plorĝemas la popolo. Pro banejo en ĉi jaro rublon kaj sep altinojn oni prenas, pro kelo — rublon, pro fumo — dek kopekojn, pro falintaj branĉoj — kvin duonkopekojn, pro akrigado de hakilo — dek kopekojn. Kie tion oni aŭdis? Kaj se vi mem hakilon akrigos — ricevu bastonbatojn: la fiskon, oni diras, vi priŝtelis. Dek kopekojn, li diras, por orfoj pro la sveda militiro, ĉu vi aŭdis? Eĉ unu kopekon ankoraŭ oni ne donis, kaj kiu vidvino pro fumo, aŭ pro kelo, aŭ pro banejo ne pagis — tiun oni arestas kaj bastonas al la kruroj, por ke ŝi pagu impostojn. Kiel homoj vivu? Fiŝistojn nun en la maron oni neniujn ellasas, kaj barkan monon oni prenas po tri rubloj por fiŝkaptilo...

Ievlev iris, penante ne renkontiĝi per la okuloj kun Ĥagajo. Sur la mallarĝa Kanona strato Dvina vento pelis polvon, cindron. Nemalproksime trans palisbarilo du voĉoj estis elkantantaj koleran kanton:

Ne por mi, bravul', prizon' konstruiĝis,
Por mi sola, bravul', estas taŭga:
Sidas en ĝi mi, bravulo, tridek jarojn
Tridek jarojn kaj tri jarojn ankoraŭ...

— Gaje ni vivas! — diris Krikov.

— Ja pli gaje ne eblas! — respondis Ĥagajo Pustovojtov.

Renkonten, silentemaj, severe kunpreminte la lipojn, trairis lokaj negocistoj — bremenanoj, holandanoj, angloj, en ŝtrumpoj, en ŝuoj kun bantoj. Pastro Fritsch orgojle riverencis al Ievlev, anglo Martus haltis por mallonga peto. La dogansoldatoj kaj matrosoj same haltis, ĵetante malamikemajn rigardojn al la fremdlandanoj.

— Mi aŭskultas vin, *sir*! — diris Ievlev.

Martus plej respekte prezentis sian aferon: li estas rajtigita de ŝipestroj de venintaj negocistaj ŝipoj peti la altestimatan kapitan-komodoron permesi al la ŝipoj reveni en la patrujon. Komerco en ĉi jaro, certe, ne estos. La rusianoj gardas sin kontraŭ la svedo, paspermesojn al fremdlandanoj por eniro en la internajn regionojn de Moskvio la kapitan-komodoro same ne donas. Pro tio estas granda malprofito al la komerco. Plenumante devojn de komerca konsulo de kelkaj ŝtatoj, li, Martus, konvinke petas sinjoron kapitan-komodoron permesi al la negocistaj ŝipoj forlasi Arĥangelskon kaj eliri trans la skansojn en la maron.

Ievlev ridetis.

— Ĉu memoras sinjoro konsulo negociston Urquhart-on? — demandis li, kvazaŭ dezirante rakonti gajan novaĵon.

Martus respondis, ke, certe, li memoras: estis tia malalta,

diketa, bonkora homo. Li ne nur memoras, ili estis bonaj amikoj. Kaj eskortulon Golgolsen-on li same memoras — vera maristo. Ievlev tuj daŭrigis la vortojn de Martus pri eskortulo Golgolsen. Kiu povas disputi kun tia aserto? Vere, eskortulo Golgolsen estas vera maristo.

Pastro Fritsch aliris pli proksime, aŭdinte la nomon de Golgolsen.

— Ne nur bona maristo, sed ankaŭ fidela kristano! — diris li. — Ĉiam, venante kun ŝipoj, li fervore preĝadis...

Ievlev kapjesadis penseme:

— Jes, jes, ĝuste tiel, ĝuste tiel. Kaj jen ili nun komandas la svedajn ŝipojn, kiuj devas ruinigi la urbon Arĥangelskon. Ŝipestro Urquhart estadis ĉi tie kiel negocisto, kiel bona amiko, eskortulo Golgolsen eskortadis ŝipojn, defendadis kontraŭ maraj piratoj. Ili konas la ŝanelon, konas la urbon, havas ĉi tie konatojn, kaj jen ili intencas ree veni ĉi tien...

Silvestro Petroviĉ dismovis la manojn, ĝentile riverencis al Martus:

— Mi bedaŭregas, *sir*, sed ellasi la ŝipanojn mi ne povas. Mi ne havas eblon fidi...

Li riverencis ankaŭ al pastro Fritsch:

— Jes, sinjoro pastro... Kiu povus tiam pensi pri malamikemo de sinjoro Golgolsen?

Li riverencis al la ceteraj fremdlandanoj:

— Bonan tagon, sinjoroj...

Martus interŝanĝis rigardojn kun la pastro, diris minace:

— La maristoj estos ekstreme malkontentaj, sinjoro kapitan-komodoro. Ili eliros sur la bordon kaj faros diboĉon en la urbo.

Silvestro Petroviĉ respondis ne tuj:

— Mi ne konsilus al ili diboĉi, *sir*. Mi, sur via loko, en la nomo de la konsulo malpermesus al ili konduti maldiskrete. Ni troviĝas en atendo de malamiko. Ĉie ni havas gardojn. Ni ne toleras ajnajn malĝentilaĵojn...

— La maristoj de la amikaj regnoj, sinjoro kapitan-komodoro! — rimarkis Martus.

— Kaj se ili estas maristoj de amikaj regnoj, tiam ili tenu sin kiel amikaj! — diris Ievlev kaj daŭrigis sian vojon.

— Pri kio vi konversaciis tiom longe? — demandis Krikov, kiam la fremdlandanoj malaperis trans la angulo.

Ievlev detale rakontis al Krikov kaj Pustovojtov, pri kio temis.

— Vi starigu matrosajn gardantarojn! — ordonis al Ĥagajo Ievlev. — Vi mem, amiko, hodiaŭ ne dormu! Kaj vi, Atanazio Petroviĉ, viajn homojn, kiuj estas pli trankvilaj kaj fidindaj, en gardoj elkonduku sur kajojn kaj en ceterajn homplenajn lokojn. Ĉe la drinkejo gardo estu dum tuta nokto. Se io komenciĝos, ili mem sin kulpigu, kaj komenciĝos, kiel mi pensas, nepre...

— Al Moskvo ili denove plendojn skribos! — diris Krikov.

— Du mortoj ne estos, kaj unu ne eviteblas, Atanazio Petroviĉ. Kaj ankoraŭ memoru: abundas rusoj en Rusujo, kaj ne ĉiuj plendoj de fremdlandanoj nepre estas akceptataj. Ni estas nemalmulte instruitaj. Frapu, Ĥagajo!

Ĥagajo Pustovojtov prenis pordofrapilon, ekfrapis al

krudfera tabulo sur la pordego de la Kanona korto. Silvestro Petroviĉ eniris la unua, post li, retenante la spadojn, iris Pustovojtov, Krikov. Kanona majstro Reger Ripley renkontis la gastojn per afablaj riverencoj kaj kondukis ilin al si en tre puran ĉambron — trinki bieron. Silvestro Petroviĉ eltrinkis kelkajn glutojn, ekrigardis al la kanona majstro per siaj helbluaj okuloj, diris afable:

— Sinjoro majstro, via amiko sinjoro Lebanius sendas al vi plej bonajn dezirojn. Ni dezirus, ke vi faru nun al ni kompanion kaj iru en la citadelon.

Reger Ripley estis singarda homo. Li per nenio esprimis sian miron. Li eĉ kvazaŭ hezitis forlasi la Kanonan korton. Sed Ievlev konsolis lin: li trovis ĉion en tia bona ordo, ke la kanona majstro tute povus foresti dum du tagoj.

Kune ili ĉirkaŭiris ĉiujn angulojn de la korto. Nealta, tre maldika, ĝibeta viro en senzona ĉemizo, kun streĉe lumanta rigardo akompanadis ilin ĉie, kaj estis videble, ke li konas la kanonan aferon ne malpli bone, ol majstro Ripley. Kaj la majstro mem esprimis pri li kun laŭdo.

— Venu ĉi tien, Teodozo! — diris li. — Jen homo, alnomata Forĝisto, sinjoro kapitan-komodoro. Kun tempo el li fariĝos bona kanona majstro. Bedaŭrinde, li ne ĉiam kaj ne en ĉio obeas min kaj havas sian opinion pli, ol al li tion povas permesi lia scio de la arto...

Forĝisto ĵetis al Ripley malestiman kaj saĝan rigardon, kvazaŭ estus komprenanta la fremdan parolon.

— Vi restos anstataŭ majstro! — ruse diris al li Ievlev. — Ĉu vi sukcesos?

— Ni sukcesos! — trankvile respondis Teodozo.

Ripley sur velboato ekiris en la citadelon sub gardo de tri inteligentaj matrosoj, kiuj sciis, kion fari kun li tie. Kiam la velboato estis debordiĝanta, li maltrankviliĝis, sed estis jam malfrue.

Silvestro Petroviĉ tiutempe estis diranta al Forĝisto:

— Sinjoro Ripley restos en la citadelo, estos tie longe. Vi, amiko, ĉi tie kanonojn gisu, kuglegojn; ĝis la svedon ni forpelos, vi estos en la Korto kiel mastro. Diru honeste, veron diru, la tempo estas ne por ŝercoj: ĉu vi ĉion bonorde faros?

— Ni faros! — trankvile respondis Forĝisto. — Veron mi diras! Estu certa!

5. Tranĉilon oni ĵetis...

Apud la Sepurba domo sidis, staris, kuŝis centoj da homoj, alpelitaj laŭ ordono, por firmigi fortikaĵojn — la Kolan, la Suman, la Pustozeran, la Keman, la Mezenan, ankaŭ la Solovkian klostron. Homoj el Granda Ustjugo, el Vjatko, el Solviĉegodsko, Totjmo, Ĉarono, Kevrolo, Mezeno estis suferantaj en la grandega korto, dekestroj nomvokadis siajn homojn, vekadis ekdormintojn per piedbatoj, insultadis en timo, antaŭsentante punon, kalkuladis mense fuĝintojn, juĝadis per Dio al intendantoj, centestroj, kancelarianoj. Samloke, en la korto de la Sepurba domo, ĉe tenejoj, kuiristinoj, venintaj piede kune kun la brigadoj de la viroj, ricevadis provizojn: sekalan panon, avenon, muelitan ŝelon por bona bakado, salon, pizon, vinagron, salitajn bovajn orelojn kaj vostojn, tripon, sunsekigitan fiŝon, lampan oleon, por ke la brigadoj ne forgesu en foraj fortikaĵoj preĝon.

Teneja intendanto, rapidmova vireto, penis trompi en kalkulo, subŝovi ion pli putran. La kuiristinoj unue penadis admoni lin per bonaj vortoj, poste ŝrikadis, vokadis siajn virojn por helpo; la viroj, koleraj, nesatdormintaj, iradis batali, sed vane — el la tenejo elŝoviĝadis gardisto kun halebardo, rufa knabego kun melankolia rigardo, en tabula armaĵo, por ke iu ne piku per tranĉilo. Snufante, li ordonadis:

— Nu, blatoj, en fendojn!

La viroj gratadis sin, interrigardadis. Kun tia ulo ĉu indas konflikti? La intendanto, ne perdante tempon, tromppesadis, trompkalkuladis, aldiradis:

— Ni kune, kune, laŭ ordo, laŭ bono. Ĉu mi por mi mem ion bezonas? Jen panon mi maĉis kaj dankon al Dio — mi satas, per gajaj piedoj ekiris. Prenu, patrino, fiŝon. Salon prenu. Ĉe ni estas laŭ pezo, ĉio ĉe ni estas laŭ Dio, ĉio kiel necesas...

El ĉi tie, kalkulinte siajn homojn, dekestroj elkondukadis la brigadojn sur velboatojn, platboatojn kaj ceterajn ŝipojn; levadis velon sur la masto; krucosignante sin, retrorigardadis al kupoloj de Arĥangelskaj preĝejoj. La ŝipoj iradis al fortikaĵoj, al sekretaj tranĉeoj, kiuj estis konstruataj en Dvinaj insuloj, al redutoj, al fuortoj, kie oni devis instali kanonojn. Virinoj kaj viroj, ne vidintaj grandan akvon, gapadis al Dvinaj ondoj, kaj en la maro ili entute faladis kaj ĉe ĉiu bato de hulo estadis preskaŭ mortontaj. Kaj bravaj Blankmaraj rudristoj nur ridegadis kaj pli forte turnadis la rudron, pli akre ekzerciĝadis en marista babilado: homo estas pekema, ŝatas ridi, timigi kaj ŝerci.

Ĉi tie, en la korto de la Sepurba domo, dum tiuj ĉi monatoj travivis Silvestro Petroviĉ kvazaŭ kelkajn vivojn. Ĉi tie oni

faladis al liaj piedoj, kun larmoj petadis lasi reveni al sia mastrumaĵo, kaptante la kaftanon, plendadis pri maljustaĵoj kaj subpremoj. Ĉi tie li serĉadis ofendintojn, ĉi tie li juĝadis per sia rapida juĝo koruptulojn kaj ŝtelulojn, ĉi tie li vidis brulantajn per kolero okulojn — kaj komprenis, kiel malmulte li povas fari per sia juĝo, per siaj punoj, per siaj penoj vivi laŭ justo. Kun ĉiu tago plendoj multobliĝadis, oni priŝteladis la fiskon ĉiam pli ruze; necesis aŭ forlasi la konstruadon de la citadelo kaj nur enketadi pri ŝteloj kaj koruptaĵoj, aŭ ne plu atenti la maljustaĵojn kaj fari sian aferon — konstrui la citadelon.

Ne atenti ŝteladon kaj ofendojn li ne havis fortojn; longe li serĉadis la kaŭzon, la kulpulojn de la konstanta malsato de laborantoj, li vidis, ke oni lin trompas, perdadis trankvilon, furioziĝadis, poste riproĉadis sin. Malantaŭ lia dorso oni ridis: «Ne kaptiĝis — ne ŝtelis!» Ofenditoj suspiradis: «Ĉu ŝteliston kaj ofendanton tiele eblas preni! Ĝi jen kien iras — al la bojaro-vojevodo. De la malsupro ĝis la supro mano manon lavas!»

Kun paso de tempo Silvestro Petroviĉ iĝis multe pli silentema, ol estis antaŭe, multe malpli ofte ridadis, vivis, metinte antaŭ si unu celon: rebati de Arĥangelsko la svedan latronon! Rebati per ajna kosto, morti ĉi tie mem, sed ne allasi malhonoron...

Li dormadis malmulte, kion oni metadis sur tablon por tagmanĝo — ne rimarkadis. Nun li ne forturniĝadis, kiam vidis mortinton en la korto de la Sepurba domo, ne paliĝadis, kiam frenezuloj aŭ histeriuloj promesadis al li, razmuzela tabakulo, stampita per antikrista sigelilo, gehenon inferan, terurajn turmentojn de bolado en peĉo. Ĝuste tiel ili devis pensi pri li.

Kiu li estas por ili? Poste, eble, ili komprenos, kun tempo pardonos.

Sed tamen amaro estis en la animo...

Foje, kiam en krepusko de nebula printempa humida nokto li estis eliranta el la Sepurba, iu lerte ĵetis al li bone akrigitan tranĉilon kun peza osta tenilo. Se ĝi trafus — li blindiĝus, — tiel proksime al la okulo enpikiĝis la tranĉilo en la skulptitan balustron de la perono. Silvestro Petroviĉ aŭskultis, kiel forkuras tiu, kiu deziris murdi lin, prenis la tranĉilon al si por memoro. Kiam li revenis hejmen, Irenjo kaj Venjo ne dormis, li glatumis iliajn malpezajn haretojn, pensis kun angoro: «Ili restus sen patro. Sed pro kio?»

Iam en bona horo li rakontis pri tio al Manjo. Ŝi kunfrapis la manojn, ekploris:

— Pro kio?

Silvestro Petroviĉ respondis morne:

— Vere — pro kio, Manjo? Mi por ili estas ruiniganto, mi por ili estas kruela ofendanto. Mi pelas ilin for de la vilaĝoj, de la plugejoj, de la kampoj, — por konstruado de nesciata citadelo, homoj mortas, nutro mankas. Kiom da malfeliĉo netolerebla mi kaŭzas! Kiom da larmoj pro mia instigo estas verŝataj!

— Sed kion do fari? — flustris Manjo.

— Por ili, laborantoj, mi estas ofendanto, — morne, per glata voĉo daŭrigis Ievlev. — Kaj por ŝteluloj mi estas ofendanto! Ne permesas mi ŝteli, minacas per pendumilo, per prizono, mem batas, — do mi same estas kruela malamiko...

Poste Manjo en ĉeesto de Atanazio Petroviĉ karese petis la edzon surmeti sub la kaftanon kirason. Krikov ekrigardis al Manjo, demandis:

— Kontraŭ kiu do kirason?

— Ne kontraŭ bonaj homoj, certe! — respondis Manjo. — Kontraŭ malicaj...

— Ne malicaj ili estas — malfeliĉaj! — diris Atanazio Petroviĉ. — Kiom povas toleri homo? En frenezo, ne sciante, kion li faras, ĵetis tiu la tranĉilon pro instigo de sama malfeliĉulo...

Silvestro Petroviĉ ĵetis rapidan rigardon al Krikov; la vizaĝo de Atanazio Petroviĉ estis malgaja, la ŝultroj estis mallevitaj. Per sia granda forta mano li estis kunpremanta la erikan pipon.

— Ĉu ĉiuj estas malfeliĉaj? — dubis la kapitan-komodoro. — Eble, estas ankaŭ malicaj en la mondo?

— Diversaj estas! — malrapide respondis Krikov. — Diversaj, Silvestro Petroviĉ, sed da malfeliĉuloj multe pli en la mondo suferas, ol da maliculoj krimas...

Leŭtenanto Meĥonoŝin en la sama tago alpelis en la korton de la Sepurba domo ĉirkaŭ sepdek ĉi tiajn malfeliĉajn vagabondojn. La viroj estis ĉifonaj, malsategaj, molestitaj. Meĥonoŝin ĉasadis ilin, kiel bestojn, ĉasadis delonge — kaj en arbaroj, kaj ĉe Dvino, kaj trans Ĥolmogoro. Neniu devigis lin al tiuj glorajĵoj, li agadis per si mem, kaj ne eblis kompreni, por kio li iniciatis tielan ĉasadon.

— Jen, kielaj! — diris li pri la vagabondoj. — Rabistoj. Mi ja scias, tieluloj bruligas bojarajn bienojn. Sklavoj, latronoj. Ĉe ni, ĉe Volgo mia frato ilin per hundoj kurĉasas, kaj poste — per

bastonoj punas, por kvietigi...

Li sidaĉis duonkuŝe, sata, en bukla fremdlanda peruko, en puntoj, fanfaronis antaŭ Ievlev kaj Krikov, ofendiĝadis:

— Malfacila afero estas venki ĉi bestojn. Sed mi revenis kaj nenian al mi favoron rimarkas. Silvestro Petroviĉ eĉ dankon ne diris, kapitano Krikov sidas forturniĝinte, ne rigardas...

Krikov levis la kapon, ekparolis per bruska voĉo:

— Ne emas mi viajn oratoraĵojn aŭskulti, sinjoro leŭtenanto, kaj des pli opinii artaĵo tion, kio estas por mi ne pli ol abomenaĵo. Kion vi tie antaŭe faradis ĉe Volgo kun via frato — mi aŭskulti ne bezonas, sed ĉi tie servutuloj ne estas, ĉi tie, dankon al Dio, la popolo estas libera, kaj ne vi ĉi tie vian ordon instalu...

Meĥonoŝin kun kurba rideto interrompis:

— Ĉar vi, sinjoro kapitano, mem estas malnobelo — ĉi kampuloj por vi estas amikoj, tial pri ili vi klopodas...

Silvestro Petroviĉ frapis per la polmo la tablon, kriis:

— Sufiĉas diri stultaĵojn, leŭtenanto! Kaj poste sen mia ordono pri kaptado de homoj ne okupiĝu! Ne pri tio nun pensi necesas! Kaj ekstaru, kiam mi kun vi parolas!

Meĥonoŝin malrapide leviĝis de la benko. Ievlev, sufokiĝante pro furiozo, skuis la pugnojn antaŭ la nazo mem de la leŭtenanto:

— Ĉu vi denove vestiĝis, kiel malĉastulino? Ĉu vi estas oficiro aŭ fremdlanda simio? Se mi vin ankoraŭ foje en ĉi aspekto vidos — estos vi en la punejo trans krado por ne malpli ol tri tagoj! Ĉu vi memorfiksis?

— Mi memorfiksis! — kun tordita pro kolero vizaĝo respondis Meĥonoŝin.

Ili eliris sur la peronon, ĝuste tiun peronon, kie printempe oni ĵetis la tranĉilon al Silvestro Petroviĉ. La vagabondoj, ĉirkaŭitaj de rajdaj dragonoj, iuj sidis, iuj kuŝis sur malalta, piedpremita, velka herbo. La suno jam estis subiranta. Trans la palisbarilo de la Sepurba domo estis pigre muĝantaj bovoj kaj akute blekantaj ŝafoj, seke, kvazaŭ pafoj, klakadis paŝtista knuto. La dragonoj, elturmentitaj de laco, estis dormetantaj en la seloj.

Silvestro Petroviĉ, apogante sin sur la bastono, mallerte movante la malsanajn krurojn, malleviĝis de la perono, per la mano flankenigis de la vojo la muzelon de dragona ĉevalo, ekstaris inter la viroj. Unu estis manĝanta pankruston, ricevitan almoze, dum oni pelis ilin tra la urbo; alia, malfacile spirante per sekiĝinta buŝo, maloportune turninte la kapon, estis bandaĝanta per ĉifono sian vunditan ŝultron; tria estis laŭte krakmaĉanta per la blankaj dentoj brasikstumpon. Ankoraŭ unu — nigra, hirta — estis per rapida flustro ion diranta al sia najbaro, almontrante per la okuloj Ievlev-on.

— Jen kio, viroj! — diris Ievlev. — Kiuj vi estas — min ne koncernas. Pro kio vi kaŝas vin en arbaroj — mi scii ne deziras. Nur unu aferon mi ordonas: staru ĉiuj, kiuj sin tenas sur la piedoj, al laboro. Ĉu estas tiaj, kiuj scias metiojn? Ĉu estas ĉarpentistoj? Masonistoj? Lignaĵistoj? Jungaĵistoj?

La viroj silentis, ĵetante malkonfidajn rigardojn al Ievlev.

— Por kio kun ili babili! — kolere kriis Meĥonoŝin. — Doni al ĉiu po cent batoj — ili iĝos cedemaj...

— Atendu ankoraŭ — ni renkontiĝos! — promesis la nigra viro al Meĥonoŝin — Memoros vi ĉi vortojn!

Krikov aliris al Silvestro Petroviĉ, diris nelaŭte:

— Permesu al mi kun ili paroli, sinjoro kapitan-komodoro. Mi faros. Ĉio estos kviete kaj kiel necesas. Forigu, pro Dio, leŭtenanton Meĥonoŝin-on por eviti malbonon...

Ievlev ordonis al Meĥonoŝin iri ripozi, mem aliris al la palisbarilo. Krikov eksidis inter la viroj sur segitajn tabulojn, al la dragonoj ordonis rajdi post sia leŭtenanto, de la kaporalo akceptis liston, kiom nombre estis prenite da fuĝuloj. Nomoj en la listo ne estis, — la kaporalo diris, ke la fuĝuloj siajn nomojn malkovri ne deziris.

— Bone, la afero ne gravas! — respondis Krikov.

Forveturis ankaŭ la kaporalo. La nigra viro — Silentulo — alsidiĝis al Atanazio Petroviĉ.

— Faru kiel mi diros! — flustre ordonis al li Krikov. — Sur la Marka insulo ni nun metos fostojn, sur la fostoj estos turnoŝekloj, sur tiuj turnoŝekloj estos ĉenoj. Per la ĉenoj ni baros Dvinon de la Marka ĝis la citadelo mem. Faru brigadon el ĉiuj, kiuj estas viaj homoj; ili sidu kviete, kiel akvo, jam hodiaŭ mi vin ĉiujn tien instalos. Tie por vi kaj nutro estos ŝtata kaj por vojevodaj homoj la vojo estas fermita. Laboru bone, ĉu vi komprenis?

Silentulo kapjesis, diris mallaŭte, ke ĉi tie preskaŭ ĉiuj estas liaj — homoj bonaj, fidindaj, ili kaptiĝis hazarde, malsatis kaj venis al malĝusta vilaĝo.

Krikov retrorigardis al Ievlev, ekstaris, kriis al Silentulo:

— Sufiĉas! Tro parolema vi estas! Iru kaj faru kiel dirite, alie vi ĉiuj kun elŝiritaj nazotruoj el ĉi tie foriros!

Silentulo subridis kaj deiris al la viroj.

— Manĝigi ilin necesus! — diris Ievlev.

— Eblas manĝigi, kaj eblas ankaŭ malsataj sendi! — respondis Krikov. — Ĉio eblas.

Silvestro Petroviĉ kun miro ekrigardis al Krikov, tiu klarigis kun amaro:

— Longe oni ĉe ni ne vivas, sinjoro kapitan-komodoro, kaj ni eĉ ne tro pri tio zorgas. Unu mortas — soldatoj alian venigos, la alia mortos — la trian sur ĉeno oni trenas...

Ievlev metis la manon sur la larĝan ŝultron de Krikov:

— Lasu, kapitano!

— Kion mi lasu?

— Pensu pri ĉi amaro malpli. Nia afero estas militista, nia zorgo estas la militista ĵuro. Pli malproksime mi ne rigardas.

— Ĉu vere? Kaj ĉu ellernis vi mem, sinjoro kapitan-komodoro, pensi pri tio malpli?

Ievlev, ŝajniginte, ke ne aŭdas la demandon, ekiris en la domon.

6. Nobelido preterveture...

Antaŭ la nokto la vetero malboniĝis: la ĉielon super Dvino kaj super la urbo kovris pezaj, malrapidaj nuboj, sur mallarĝaj stratoj kaj stratetoj de Arĥangelsko, sur kurbaj pavimoj, sur kavoj kaj kavetoj malvarma mara vento ekturnis akvan polvon, ekklakis nefermitaj pordegoj. Eksterlandaj ŝipanoj sur la rivero

estis ĵetantaj pliajn ankrojn...

Silvestro Petroviĉ kun malserena vizaĝo estis manĝanta fiŝan brasiksupon. Antaŭ li sur la benko sidis nobelido, aĝa ĉirkaŭ dek ok jarojn — sata, rondvizaĝa, per io simila al porkido, li estis rakontanta per langvora voĉo:

— En tiu glora urbo Parizo mi dum pli ol du jaroj, preskaŭ dum tri, estis lernanta bonvivantecon kaj aliajn galantaĵojn. Sed subite mia patro en la Kaluga bieno mortis pro gala koliko. Mi devis reveni, la vojaĝo estis nemalgranda. Por iuj aferoj mi venis al Moskvo kaj hazarde trafis al la okuloj de Petro Aleksejeviĉ. Ho, Dio...

Ievlev ĵetis oblikvan rigardon al la nobelido.

— Ho, Dio! — ripetis tiu. — Tuj estis kontraŭ mi stamfado kaj aliaj malĝentilaĵoj, por ke mi sen prokrasto revenu al Parizo. Ĉu li ĉiam ĉe vi estas tiom furioza?

— Kiu li?

— Li, Petro Aleksejeviĉ.

— Por vi, flavbekulo, li estas granda Siro, sed ne Petro Aleksejeviĉ, — malmilde diris Ievlev. — Memorfiksu firme, vi evitos malfeliĉon...

La nobelido palpebrumis, klinis obee la kapon flanken, kunmetis la pufajn lipojn korforme. Por Ievlev tio aspektis ridinde.

— Kian nomon do vi havas?

— Bazilo, filo de Stefano Spafariev.

— Ĉu el grekoj?

— Nia hereda bieno, sinjoro, estas ĉe Kalugo, vilaĝo Panŝino, ankaŭ Proĥorovo..

— Ĉu vi sola nun veturas?

— Kun servisto, sinjoro.

— Misfortunis al vi. De ni ja nun ne estas vojo. Ni atendas la svedon.

— Por kio atendas? — demandis Spafariev.

— Por gastigi.

— Ĉu vere?

— Tamen vi, fraĉjo, ĉu ne estas idioto? — kun serioza mieno demandis Silvestro Petroviĉ.

— Multaj min opinias tia, — neniom ofendiĝinte, respondis la nobelo. — Sed mi ja ne estas simpla, mian profiton bonege komprenas. La forpasinta patro en antaŭaj tempoj min alie, ol idioto, eĉ ne nomadis; necesas konfesi, sinjoro, preskaŭ ĝis dek tri jaroj oni al mi pantalonon ne donadis, en ĥalato mi kolombojn peladis, sed kun aĝo ankaŭ la patro sian opinion pri mi ŝanĝis. Vi, li diris, Baĉjo, estas ruza senmezure...

Ievlev silentis, rigarde ekzamenante la nobelon, liajn senzorgajn bluajn okuletojn, liajn ĉapelformajn brovetojn, lian rozkoloran vizaĝon, spirantan saton, bonan sanon, senzorgan trankvilon.

— Iuj nobelidoj trans la maron timis veturi, — daŭrigis Spafariev, — sed mi, sinjoro, honeste diros: neniom timis. En Rusujo oni kiel diras? En Rusujo, oni diras, vivi — signifas servi. Kaj se servi, eblas kapon perdi. Iuj perdis, kun la vivo. Kaj mi rezonis modeste: por tiuj, kies monujo estas malplena

— trans la maro estas malvarme kaj malsate, sed mi ja ne estas malriĉa, por mi eĉ trans la maro estos kaj bone, kaj sate, kaj gaje. Kaj transatendos mi tie kviete...

— Kion do vi, ekzemple, transatendos?

— La tempon transatendos. Ĉio pasos, sinjoro. Paĉjo mia iam diradis: ĉio nova en la mondo — estas tio, kio estis, sed bone forgesiĝis. Mi tiun novon transatendus. Iuj en fremdaj landoj malgajas, sed mi neniom. Lernas novmanierajn dancojn, francan galantecon, amorajn kelkajn aventurojn havas, amikas kun tieaj nobelaj kavaliroj, opinias min feliĉa...

— Sed vi, Bazilo Stefanoviĉ, devis iĝi navigisto?

— Ĉu mi? Por kio, sinjoro? Min la maro batas, mi sur ŝipo senforte kuŝas, preĝas nur lamente...

— Lamente aŭ ne lamente, sed ĉu vi estis sendita de la Siro por lernado?

— Nu, sendita.

— Kaj se estis sendita por lernado, tiam oni demandos vin severe...

— Ĉu nepre demandos?

— Mi certe diras — demandos. Kaj necesos respondi.

— Mi pensas, ankoraŭ ne baldaŭ...

La nobelido sidaĉis duonkuŝe, pririgardante sian manon en fingroringoj, admirante brilon de gemoj.

— Sed se oni baldaŭ demandos? Tiam kion vi faros?

— Ne ĉiuj ja estu navigistoj, — etende eldiris Spafariev. — Necesas en la ŝtato ankaŭ decajn bonvivantojn galantajn havi.

Povas ja okazi: iu akcepto en la cara palaco, asembleo, eksterlanda princino venis, al ŝi iun kortezulon por pasigo de tempo en amoro instali necesas...

— Jen kien vi celas?

— Kaj kial, sinjoro, ne celi? Kia ajn estu amorantino, tutegale kun ŝi estas pli amuze, ol super mara abismo en ŝipo balanciĝi kaj, ne lasu Dio, ankoraŭ per kanonoj pafadi...

— Sed ĉu ekzistas tia posteno — kortezulo ĉe kortego? — kun ruzeco en la voĉo demandis Ievlev.

— La posteno ne ekzistas, sed la afero ja ekzistas korteza, — diris la nobelido, — tion mi ekzakte scias. Kaj tiun aferon mi bone ellernis. Juĝu mem: etikedo kortega por mi ne estas novaĵo, en ajna minuto mi povas min parfumi, por kio mi ĉiam parfumon en flakono kun mi portas, mi estas purema, la vizaĝon mi havas blankan, mi ne estas kurbaflanka, nek ĝiba, en konversacio mi estas parolema kaj amuza, alton mi havas sufiĉan, ja vi mem sinjoro, rigardu...

Li leviĝis de la benko kaj prenis antaŭ Ievlev pozon kiel tiuj, kiujn havis statuoj, viditaj de Silvestro Petroviĉ en fremdlandaj parkoj: unu manon kun elstarigita etfingro la nobelido tenis apud la brusto, la alian malpli alte.

— Kio do estas ĉi pozaĵo? — demandis la kapitan-komodoro.

— Ĉi pozaĵo similigas la galantulon al Apolono, aŭ al ankoraŭ iu nimfo fluganta...

— Jen kiel! — balancis la kapon Ievlev.

— Vera galantulo ĉiam, sinjoro, devas pensi pri sia aspekto

kaj montri per si modelon de vigleco, facileco kaj subtileco...

— Kion vi diras! Sed ĉu vi estas subtila?

— Mi ja ne estas subtila, sed estis rimarkite de mi, sinjoro, ke kelkaj tieaj amorantinoj — vicgrafinoj kaj markizinoj nemalgrandan inklinon havas al tiaj galantuloj, kiuj similas al mi kaj per vizaĝa ruĝo, kaj per kuraĝo, kaj per bona sano. Plezuro...

— Ni lasu plezuron, — interrompis Ievlev, — nu, kaj se demandos vin la Siro pri naviga arto, — tiam kion vi faros?

Spafariev eksidis sur la benkon, suspiris, movis la brovetojn, respondis post paŭzo:

— Tiam mi falos al la piedoj, malkovros, kiom malŝatas mi la maron, kiom mi ne estas naskita por tiu multpena vivo. Li pardonos...

— Ĉu vere?

La nobelido enpensiĝis.

Silvestro Petroviĉ plenigis la pipon, serĉis tindron kun fajrilo, ne trovis. La nobelido estis lin kaj koleriganta kaj amuzanta. «Kion ajn eblas vidi dum la vivo! — meditis li, kun subrido fiksrigardante Spafariev-on. — Kion ajn eblas renkonti sur la vojo. Malklaraj estas faroj ciaj, Sinjoro!»

— Pardonos! — certe diris la nobelo. — Nu, batos, ne sen tio. Sed kun tempo pardonos. Pli bone estas unu fojon esti forte batita, ol maljuniĝi, galantecon ne vidinte. Ja vi, sinjoro, mem juĝu — navigistoj ĉe li, ĉe la Siro, ĉiam pli kaj pli multaj iĝas, sed da veraj bonvivantoj estas neniom. Mi sola estos. Li ne nur ne koleros, ekvidinte mian al li fervoron, sed ĉiel dankos. Ne

povas esti tia regnestro, kiu sen galantaj bonvivantoj ĉe sia kortego vivus. Jen Parizo. Kiom en ĝi da glorindaj kavaliroj nenion faras, krom diversajn artaĵojn, gajaĵojn kaj lertaĵojn, por ornamo de rapide flugantaj jaroj de vivo servantajn. Kaj ĉe la kortego kun favoro estas akceptataj ĉi kavaliroj, kaj en ajnan domon eniras, kaj ĉiuj ilin respektas pro ilia spriteco, pro gajeco kaj kortezeco amora...

«Kiu ajn en la mondo vivas!» — ree pensis Silvestro Petroviĉ kaj diris:

— Tamen tro multe mi kun vi konversacias, sed mi ne havas tempon. Do — per maro el ĉi tie vi vojaĝon ne povas fari. Iru en vian Parizon laŭ alia vojo. Ĉi tie se ne hodiaŭ, tiam morgaŭ estos batalo, kaj eĉ unu ŝipon ni ne ellasas...

— Ĉu estos batalo?

— Estos.

— Ĉu ĉi tie, en Arĥangelsko?

— Ĉi tie.

La nobelido ree kunmetis la lipojn korforme.

— Kontraŭ la svedoj, sinjoro?

— Tamen vi divenis finfine... Kontraŭ ili.

— Do mi, verŝajne, tranoktos kaj reen iros...

— Kaj se hodiaŭ nokte la svedo atakos? — malmilde demandis Ievlev.

— Hodiaŭ?

— Hodiaŭ. Atakos — kaj vi trafos al li. Li ne distingos, kiu vi estos — bonvivanto aŭ navigisto. Li tuj vin sur pendumilon

levos...

— Tiam mi, sinjoro, vere jam hodiaŭ reen iros. Kaj tranoktos jam en la gastejo, kie la pasintan nokton tranoktis. Tie estos pli kviete.

Ievlev silentis iom, poste, penante reteni sin, dise prononcis:

— Mi pensas, ne lasos mi vin iri. Mi nun ĉiun homon bezonas. Kaj vi estas knabo sana, fortika, jen ankaŭ spadon kunhavas, kaj pistolon bonan...

La nobelido iom leviĝis sur la benko, tuj sidiĝis, ekpalpebrumis, ekbalbutis:

— Sed kion vi diras, sinjoro kapitan-komodoro, ĉu tio estas pensebla? Al mi estas de la cara nomo ordonite al urbo Parizo...

— Sed kio pri Parizo? Se vin ĉi tie en glora batalo oni mortigos — kia postulo? De mortinto Parizon oni ne povas preni. Aliaj tien iros lerni navigarton... Vi restos ĉi tie, kaj kiam la batalo pasos, se vi estos viva, — en la vojaĝon vin direktos...

Sed tuj Silvestro Petroviĉ eknaŭziĝis, li ekstaris kaj ordonis al la nobelido iri for al ĉiuj diabloj. Spafariev riverencis, retroiris, ne kredante sian feliĉon, ankoraŭ riverencis. Kaj tuj en la korto, sur traba pavimo, ektondris feritaj radoj de kaleŝo.

La bonvivanto forveturis.

Knaris la pordo, eniris Jegorĉjo.

— En la urbo kio estas? — demandis Ievlev.

— Fremdlandanoj diboĉas. Al Magrulo en la drinkejon ne eblas eĉ eniri. En la fremdlanda Komerca korto oni malfermis butikon kun drinkaĵoj, kantojn kantas, insultas nin, rusojn. Apud la Asumpcia preĝejo unu ulo iradas, kriadas: «Atendu, la

svedoj venos, tiam vi ekscios, kia malbono en la mondo estas...»

Silvestro Petroviĉ petis braĝon — bruligi la pipon. Jegorĉjo kuris por ĝi en la kuirejon, Ievlev ekfumis, ekpaŝis tra la ĉambro el angulo en angulon, pensadis. Poste li demandis Jegorĉjon:

— Jen vi laŭ stratoj kuradis. Ĉu multaj fremdlandaj matrosoj de la ŝipoj eliris?

— Ĉu multe, ĉu malmulte — tion, Silvestro Petroviĉ, mi ne scias, sed mi mem vidis nur ĉirkaŭ tri centojn, ne pli.

— Ĉu ili estas armitaj?

— Kiu scias. En manteloj plej ofte. Ĉe iuj videblas spadoj, ankaŭ tranĉiloj.

Ievlev kapjesis.

— La niaj ĉie staras, — daŭrigis Jegorĉjo. — Kaj ĉe la monaĥejo, kaj ĉe la arsenalo, kaj ĉe la Komerca, en ĉiuj stratoj estas gardoj. Matrosoj, pafistoj, dragonoj, rajdistoj...

Silvestro Petroviĉ finfumis la pipon, batpurigis ĝin ĉe la forno, ordonis seli. Post malgranda tempo, sub pluveto, kaŝante la vizaĝon de vento, li elrajdis sur du ĉevaloj kun Jegorĉjo — kontroli patrolojn, gardojn...

Kaj en la urbo ĝuste tiutempe jam komenciĝis ekscesoj.

El la Magrula drinkejo sur la malsekan straton elfalis amaso de fremdlandaj maristoj, ĉirkaŭ kvardek homoj, ne tro ebriaj, sed ankaŭ ne sobraj. Sur la fremdlandaj ŝipanoj estis surmetitaj ledaj kirasoj, larĝaj feritaj zonoj, ĉapeloj kun randaĵoj estis kaŝantaj la vizaĝojn, kovritajn per cikatroj, bruligitajn per

pulvo. Sabroj, spadoj, ponardoj estis batantaj al la maldikaj femuroj, al la suroj en striktaj ŝtrumpoj, al la larĝaj mallongaj pantalonoj.

Apud la drinkejo la ŝipanoj iom disputis inter si, kion fari plu kaj kiel plenigi sian liberan tempon — ĉu eble rompi malriĉan domaĉon, kiu estis malsekiĝanta apude sub pluvo? Subite el trans angulo aperis patrolo de rusaj matrosoj. La fremdlandanoj eksilentis kaj ekgapis al tri junuloj, kiuj en matrosaj jakoj, kun kartoĉaj skatoloj kaj sabroj, en malalte surmetitaj trikitaj ĉapoj, estis vice irantaj laŭlonge de la barilo.

— Matrosoj! — diris unu fremdlandano.

— Rusaj matrosoj! — ekkriis alia.

— Matrosoj el putra flako! — kriis dika malalta ferdekestro.

— Ni ludu kun ili! — proponis ankoraŭ unu.

Disŝprucigante koton, li transkuris la straton, demetis antaŭ la matrosoj la ĉapelon kaj faris al ili riverencon, frapante per la piedo. La tri rusaj junuloj kun ridetoj rigardis al la drinkinta strangulo. Aliaj fremdlandanoj, gakridaĉante, kiel anseroj, same transiris la straton...

La unua ankoraŭ estis grimacanta, kiam la aliaj komencis kapti la matrosojn je la teniloj de la sabroj. Ne pasis eĉ kelkaj sekundoj, kiam la plej juna matroso iĝis ligita kaj ĵetita en flakon, al la alia oni disbatis la vizaĝon, la trian la ferdekestro estis ŝiranta je la oreloj kaj aldiranta kun ĝuo:

— Rusa porko! Rusa porko! Preĝu al mi!

La matroso estis elŝiranta sin. La penso igi la matroson preĝi tre plaĉis al la fremdlandanoj. Ili starigis lin antaŭ si sur la

genuojn kaj ordonis riverenci, kvazaŭ li vidas ikonon. La matroso leviĝis sur la piedojn, oni batis lin per sabro al la kapo, li sen konscio falis per vizaĝo en likvan koton, sufokiĝis en akvo. La dika ferdekestro mallevis la sabron en la ingon kaj ŝerce ekkantis preĝon. Aliaj kunkantis. La venko super la tri rusaj matrosoj varmigis la sangon. La fremdlandanoj trinkis ankoraŭ brandon el platbotelo kaj, preninte trabon, komencis, kiel per ramo, bati per ĝi al la muro de tiu domaĉo, kiu jam antaŭe altiris ilian atenton. En la domo komencis krii virinoj. La malnova domo estis ŝanceliĝanta, la traboj eliĝis el siaj nestoj, la tegmento tuj povis enfali kaj premmortigi homojn. Sed la fremdlandanojn nenio ĝenis, kaj ne estas sciate, per kio finiĝus ĉio ĉi, se ne aperus el post la Magrula drinkejo subleŭtenanto Ĥagajo Pustovojtov kun siaj knaboj. Liaj homoj estis junaj, de la printempa rekrutigo, nur el Blankmaraj loĝantoj. Plenaĝajn matrosojn Ĥagajo tute fidis kaj tial sendis ilin en gardojn kun malpli spertaj oficiroj, sed al si li prenis la junularon, kiun li nur komencis instrui pri milita ordo. Ankaŭ nun li estis instruanta siajn matrosojn, ne dezirante perdi valoregan tempon.

— Livan, dekstran, livan, dekstran, un', du, levu, metu, — estis komandanta Ĥagajo, elirante el post la drinkejo kaj retropaŝante antaŭ la matrosoj, — vigle, matrosoj, un', du, un', du...

La matrosoj iris lerte, brave, la koro de Ĥagajo ĝojis. Sed subite, perdinte la ritmon, ili komencis surpaŝi kalkanojn unu al alia kaj momente kunpuŝiĝis en amason. La subleŭtenanto estis preta krii al ili, sed rigardinte tien, kien rigardis liaj knaboj, li rigidiĝis: du rusaj matrosoj kuŝis apud domo malvivaj, kaj tria

en sango apogiĝis al la barilo. La fremdlandanoj, levinte la trabon, estis batantaj per ĝi en la muron de la domo.

Dolĉa furiozo kvazaŭ sur varma mara ondo balancis Ĥagajon Pustovojtov-on. Liaj nigraj brovoj kuniĝis, li mallaŭte diris:

— Ek, knaboj!

Li ĵetis flanken, en flakon, siajn dandajn funelajn gantojn, forĵetis la ĉapelon, por ke ĝi ne malhelpu batali, kaj ekiris antaŭen sen retrorigardi, sentante malantaŭ la dorso spiradon de la matrosoj, aŭdante iliajn fortegajn paŝojn.

Iuj el la ŝipanoj retrorigardis, ekfajfis per la fingroj, la fremdlandanoj eltiris el la ingoj la spadojn, sabrojn, ponardojn, sed estis malfrue. La matrosoj surfalis dense per tuta sia varmega lafo, ĉies koro kunpremiĝis pro delonga malamo, nun eblis kun gloro rememori la malnovajn ofendojn...

— Ne ba-ati! — longe, etende kriis Ĥagajo. — Ligi ilin, sed ne bati! Ligi la latronojn!

Ho, kiel entranĉiĝus Ĥagajo la unua en la amason de la fremdlandanoj, eltirus al si pli proksime, al la brusto mem, jen tiun, rufan, lipharan, maĉantan nikotianon, kiel, mallarĝiginte la okulojn, ekrigardus en la flagrantajn pupilojn kaj batus unu fojon, duan, trian — pro ĉio pasinta, pro sia urbo Arĥanĝela, kie iĝis fremdlandanoj mastroj, pro tiuj ĉi tri matrosoj-amikoj, kiuj kuŝis nun senmove ĉe la muroj de la domo... Kiel torento irus post li la matrosoj, kun furioze gaja hurlado batadus sen reguloj, — se bati, do bati, dekstre kaj maldekstre, ne tuŝu la niajn, fremdulo, se vi estas gasto, do estu gasto, sed se malamiko — ricevu, kion vi meritas, plene kaj plie, kaj ne diru

dankon...

Sed ne eblas! Estas malpermesite bati!

Eblas nur ligi ebriajn instigantojn. Nu, kaj se iu tro diboĉas — tiun, por ajna okazo, faligi kvazaŭ hazarde, kvazaŭ li mem falis. Se iu mordas kaj gratas — tiun skui eblas aŭ kun singardo ŝovi pugnon en la satan flankon, por ke revenu la memoro, — ne hejme vi estas, gastas, ne bruu!

Ili ligadis per ŝtofaj zonoj — da zonoj ne sufiĉis. Tiutempe iĝis pli kviete. La ligitoj ektimis; tiuj, por kiuj ne sufiĉis zonoj, staris flanke sub pluveto, per tukoj viŝadis la lacajn vizaĝojn, konsiliĝis, kion fari poste, plendis pri estontaj afliktoj...

Ĥagajo, ekvidinte, ke la gastoj kvietiĝis, starigis la ligitojn aparte, la aliajn pelis pli malproksime, poste ordonis meti sur herbon, sur puran lokon, la du murditajn matrosojn el la patrolo. Kelkaj fremdlandanoj intencis disiri, sed la subleŭtenanto ordonis neniun lasi.

Matroso Podbojlo elportis el la domo, kiun preskaŭ disfaligis la fremdlandanoj, sitelon kun akvo, lavis la vizaĝojn de la murditaj matrosoj. Tio estis knaboj el la lasta rekrutigo — Jablokov kaj Mikeŝin. La matrosoj, interparolante, demetis de sur la kapoj la trikitajn ĉapojn. La fremdlandanoj morne silentis. Drinkemuloj el la Magrula drinkejo, pafista gardo, rajdistoj — ĉiam pli multe da popolo kunvenadis ĉirkaŭ la eksa batalejo. Estis sensone. En la silento subite ekplorlamentis maljunulino, elirinta el la domo por rigardi al la ofendintoj, — ekvidis la du mortintojn, ekstaris sur la genuojn en malsekan velkan herbon, reĝustigis la helajn molajn buklojn de Mikeŝin, kunmetis la manojn de Jablokov kruce sur la brusto, ekploris...

La batita, restinta viva matroso el la patrolo estis nelaŭte rakontanta al Ĥagajo, kiel ĉio okazis. Ĥagajo aŭskultis atente, redemandadis. La matroso trovis per la okuloj la dikan ferdekestron, kapmontris al li. La pafistoj deĉevaliĝis, elkondukis la ferdekestron al la domo. Tiu komencis krii, ke li ne sola estis, ankoraŭ estis kun li homoj. Ili prenis ankaŭ tiujn, al kiuj li montris.

Trote alrajdis la kapitan-komodoro kun Jegorĉjo. Ievlev, envolvante sin en vaksita, kanvasa mantelo, senvorte elaŭskultis ĉion, kion diris al li Pustovojtov; eltirinte la manon el la ganto, viŝis la malsekan vizaĝon; mallarĝiginte la okulojn, ĉirkaŭrigardis la ferdekestron kaj liajn homojn, ordonis konduki ilin en la arestejon. La ceterajn fremdlandanojn — peli al la ŝipoj, ili estu tie en konfuzo. Sur la bordon eliro por ili estos malpermesita ĝis speciala ordono...

La mortintojn — Jablokov-on kaj Mikeŝin-on — la matrosoj levis sur mantelojn, ekportis, nudiginte la kapojn. Venis mateno. La urbo vekiĝis. La matrosoj kantis mallaŭte, dece «Eternan memoron». Surĉevalaj rajdistoj, pafistoj, dragonoj akompanis la murditojn, demetinte la ĉapojn, tenante nudajn sabrojn ĉe la ŝultroj. Urbanoj, virinoj, metiistoj, ŝarĝistoj, najbaraj kampuloj amasiĝis en mallarĝaj stratoj, kun malamo rigardis al la ligitaj fremdlandanoj, suspiradis, krucosignadis sin al la murditaj matrosoj...

Kiam al Silvestro Petroviĉ oni donis velboaton por iri al la citadelo, ĉe la Resurekta kajo lin ĉirkaŭis ŝipestroj kun pardonpetoj kaj vortoj de kondolenco. Ievlev silentis. Konsulo Martus faris mallongan funebran paroladon. Ievlev ne respondis eĉ per unu vorto. La fremdlandanoj ankoraŭ foje

ektrenis la plandumojn de siaj ŝuoj, ankoraŭ foje riverencis, ankoraŭ prononcis vortojn de kondolenco. Ievlev apogis sin sur la bastono per du manoj, etendis la kolon, diris per obtuza voĉo:

— Rusio, Rusujo — estas ŝtato, Rusujo ne estas sennomaj insuloj, kiujn necesas ankoraŭ malkovri, surmapigi...

La fremdlandanoj ekbalancis la kapojn: ho, certe, memkompreneble, jes, jes, alie ne povas esti.

— Fremdlandanojn ni renkontas afable, — daŭrigis Silvestro Petroviĉ, — al gasto ni ĉiam ĝojas, la rusa homo estas bonkora, gastama, kun granda koro. Sed nian gastamon vi turnas al malbono, opiniante, ke ĝi estas la samo, kiel naiveco aŭ stulteco...

La fremdlandanoj eksusuris: ho, ne, ni neniam tiel pensas.

— Dume multege da malbono vi alportis al ni! — kun forto diris Ievlev. — Kaj, se pripensi, da kio estas pli de vi — ĉu malbono aŭ bono, — tiam, ŝajne, da malbono estas pli. Do, sinjoroj marvojaĝantoj, sinjoroj ŝipestroj kaj navigistoj! Al bona konsilo ni ĉiam ĝojas, kaj ne ekzistas pli dankaj disĉiploj, ol ni. Kaj danka disĉiplo por la instruisto estas profito, ĉu ne? Kaj lernas ni por nia ŝtato — por forta, saĝa, justa. Kaj la glora ŝtato por siaj filoj estas kara patrino. Sed ĉu bona patrino permesos al diboĉema, kaj ebria, kaj maldeca fremdulo sian infanon ofendi?

La ŝipestroj kapjesadis — jes, jes, tre juste.

— Kaj se juste, tiam juste estos ankaŭ la murdintojn teni en la arestejo, kaj juĝi ilin kiel necesas, kaj puni, por ke ili ne plu okupiĝu pri malicaj aferoj. Kaj aliaj ŝipanoj en viaj landoj pri

tio rakontos. Kaj la novaj estos pli singardaj.

Silvestro Petroviĉ turniĝis kaj ekiris laŭ la ponteto al la velboato. La ŝipestroj, interflustrante, nazparolante, hastis post li. Li ankoraŭ returniĝis, rememorigis ĝentile:

— Al ŝipoj viaj, sinjoroj ŝipestroj, de mi estas deklarita konfuzo. Mi ne konsilas forlasi ilin, por ne instigi nin teni viajn matrosojn, kiel krimulojn, en arestejo. Ankoraŭ bona konsilo: poste gardu vin de eventoj, similaj al la okazintaj! Kio koncernas esperojn de kelkaj pri la svedaj militistoj, ke de tiu kuko, kiam ili Arĥangelskon rabos, ankaŭ al ili peco defalos, — do ne estos tio!

La ŝipestroj silentis.

Ievlev eniris en la velboaton, mem eksidis al la rudro. La matrosoj depuŝis la ŝipon per hokoj. Sur la masto leviĝis mallarĝa vimplo: «Kapitan-komodoro estas ĉi tie».

Silvestro Petroviĉ pro la sendorma nokto havis ioman febrotremon. Subite rememoriĝis al li la antaŭnelonga nobelido Spafariev. Kun kolero, flustre li ripetis la abomenajn kiel agaco, fremdajn vortojn:

— Bonvivanto, galantulo...

Kaj aldonis la sian:

— Kaj de kie ĉi tio aperas?

Ĉapitro sepa

En fremda lando, kiel en ĉerko, — kaj soleco, kaj muteco.

Proverbo

Murdontoj iras en sekreto:
Vizaĝ' aŭdaca, tim' en kor'.

Puŝkin

1. Antaŭ la ekspedicio

En la Stokholma rodo ŝipoj kaj eskadroj prenis aldonan balaston — krudferajn trabojn kaj ŝotron en centoj da bareloj. Kiam la balasto estis metita, malgrandaj ŝarĝoŝipoj komencis alveturigi trinkakvon. La kuracisto de la eskadro, snufante per la pipo, alŝutadis en ĉiun barelon ŝovelilon da kalko — por ke la akvo ne putru dum longa marvojaĝo.

En pobajn lukojn matrosoj faligadis manĝoprovizon — salviandon, oleon kaj vinagron en elĉizitaj lignaj boteloj, fumaĵitajn magrajn, fibrajn korpojn de ŝafoj, sakojn da sekigita fiŝo, pizon, salon. En la sekan ĉambron, tegitan per freŝaj pinaj tabuloj, desupre, el la luko oni ŝutadis malmolajn kun pajlo marajn biskotojn, forte odorantajn maltajn flanojn. En la vinan holdon oni mallevadis sur ŝnuregoj barelojn kun grena vodko — por disdonado dum la ekspedicio de la reĝa glaseto. Ekonomo-intendanto laŭ kalkulo akceptadis matrosajn ujojn por supo, krudferajn kaldronojn, kruĉojn, pesilojn kun peziloj, ĉerpilojn, stanajn pladojn, vazaron por oficira tablo.

En la admiralan kaj la oficirajn provizajn kelojn bufedistoj

haste metadis en glacion ostrojn, freŝan fiŝon, pendigadis sur lignaj najloj plumĉasaĵon, sunsekigitajn kapreolajn selojn, aprajn femuraĵojn, anasojn, anserojn, kokojn. Samloke ŝipaj ĉefserĝentoj kunmetadis armilojn kaj pulvajn rezervojn, kiuj povus esti necesaj al la oficiroj okaze de matrosa ribelo.

Ferdekestroj, rompante la raŭkajn gorĝojn, komandadis metadon de ŝanĝeblaj rezervaj ŝnuregoj, kabloj, haŭseroj, vantoj. Sub la malsupra ferdeko oni kalkuladis rezervajn kompletojn de ŝipboataj remiloj, de depuŝaj kaj kapstanaj stangoj. Takeloj kun knarado mallevadis en pruajn lukojn de la ŝipoj peĉon, kolofonon, najlojn. Ĉarpentistoj kaj kalfatristoj, pendante super la akvo en siaj «lululoj», lastfoje enigadis en foldojn lanon kaj stupon, frapante per lignaj marteloj kaj kantante kantojn.

Sur «Kolera urso» oni aldone akceptadis artilerian provizaĵon: meĉojn, rompostangojn, turnostangojn, ŝargostangojn, kojnojn, rulblokojn. Sur la flagŝipo «Krono» per veltolo oni tegadis barilon inter la pruaj kaj pobaj lukoj: ĉi tie, kie devus esti lazareto, malgaje muĝis bovoj, blekis ŝafoj, klukis kokoj. Sur «Justa kolero», laŭ ordono de la subadmiralo, oni anstataŭigadis kanonojn de la meza bateria ferdeko. La navigistoj de la eskadro lastan fojon antaŭ la malproksima ekspedicio kontroladis mapojn de maparo «Zeefakkel», kio signifas — mara torĉo, pririgardadis flagteksaĵon, sablohorloĝojn, sondilojn, logojn, lineojn. Laŭ speciala sekreta ordono de la subadmiralo la ŝipoj devis havi anglajn kaj danajn flagojn en sigelitaj sakoj — ĝis sciigo, kion fari kun ili.

Grafo Erik Gyllenstierna — la estro de la eskadro — ĉiutage kelkfoje ĉirkaŭveturadis sur sia velboato ĉiujn ŝipojn. Lin

akompanadis la pastro de la eskadro, adjutanto kaj du plej ferocaj ekzekutistoj. Al tagmezo, kutime, la subadmiralo ŝanĝadis ganton sur la dekstra mano: delikata ledo ne eltenadis, la subadmiralo batadis homojn en sia maniero — per pugno de malsupre supren, en la buŝon, por ke la kulpulo kune kun sango elsputu ankaŭ la dentojn.

Ekde matena tamburo ĝis vespera aŭroro sur pruferdekoj de la ŝipoj fajfadis vergoj kaj anglaj lineoj — ŝnuroj kun nodoj, malsekigitaj en sala akvo. Duonmortintajn pro vergado matrosojn oni trinkigadis per vodko kaj vergadis plu.

Homoj senfortiĝadis, faladis sur ŝtuparoj, sur ferdekoj. La subadmiralo neniam kaj neniun laŭdadis, al li nenio plaĉis, kun ĉiu tago li ĉiam pli morniĝadis kaj punadis homojn ĉiam pli malmilde. Fine de semajno sur «Aroma floro» matrosoj, senfortiĝintaj pro superforta laboro, postulis dimanĉan ripozon. La subadmiralo ordonis vergi ĉiun trian, kaj la instiginton — ĝismorte. La pastro de la eskadro ekiris sur ŝipboato konfespreni kaj komunii la kondamniton.

Konsiliĝo de ŝipestroj de la eskadro estis fiksita sekrete nokte sur «Krono», kie grafo Gyllenstierna tenis sian flagon. Ŝipestroj de batalŝipoj, fregatoj kaj jaĥtoj venadis po unu, sen siaj oficiroj, respondadis al deĵorantoj ĉe ŝtuparoj per konvencia pasvorto kaj eksidadis en la admirala kajuto kun dense kurtenitaj fenestroj. La kajuta vaĉanto en molaj ŝuoj donadis al la ŝipestroj fumantajn pipojn, kajuta ŝipknabo verŝadis flavan maltbieron en argilajn kruĉojn. La ŝipestroj, la ekonomo de la eskadro, la eskadra pastro, kolonelo James — fumadis, malsekigadis la lipharojn en biera ŝaŭmo, singardeme aŭskultadis, kiel trans la septo, en sia dormoĉambro, tegita per

oritaj ledoj, tusas kaj kraĉas subadmiralo Gyllenstierna. Laŭ la tusado estis kompreneble, ke la eskadrestro estas malkontenta, eĉ pli — kolera. La invititoj al la konsiliĝo sentis timidon, kiel knaboj. Grafo Erik Gyllenstierna delonge sugestis timon al ĉiuj, kiuj iam navigis sub la reĝa standardo — ora kruco sur blua kampo.

Nealta, seka, kun faltoplena flava vizaĝo, li eliris el la dormoĉambro samtempe kun batado de horloĝo, mallonge riverencis, eksidis en verdan marokenan fotelon. Sensone paŝante, la kajuta vaĉanto donis al li konjakon, la kajuta ŝipknabo sammomente metis tason da kafo. La subadmiralo dismiksis per kulereto sukeron, malrapide ĉirkaŭrigardis la vizaĝojn de siaj ŝipestroj, bruligitajn de pulvo, hakitajn en ŝipatakoj, tanitajn de vento de la Balta maro, de la Norda maro, de la malvarma oceano.

— Mi estas malkontenta, — subite prononcis la subadmiralo.

La ŝipestroj silentis.

— Mi estas ege malkontenta! — je tono pli alte diris Gyllenstierna. — Ni mallernis, diablo prenu, silenti. Ni iĝis babilemaj, kiel virinoj. La tuta Stokholmo de infano ĝis maljunulino scias, ke en la proksimaj tagoj la ekspedicio iros al urbo Arĥangelsko. Ĉiuj scias, ke ni serĉas ŝipestrojn, sciantajn la ŝanelon de rivero Dvino. La ŝipoj, kiuj estis ekipataj en Goteborgo kaj Kalmaro, estas sciataj ne nur de svedoj, sed eĉ de eksterlandanoj. Sciataj estas eĉ la nomoj de la ŝipestroj, de la ĉefaj artileriistoj; sciate estas, kiaj estas niaj rezervoj de pulvo, kiom da kuglegoj ni prenas kun ni; sciate estas, finfine, kiu komandas la eskadron kaj kia estas la pasinteco de via

komandanto...

La ŝipestroj balancadis la kapojn, miradis.

— Necesas pensi, — daŭrigis la subadmiralo, — ne nur en Stokholmo oni eksciis pri nia ekspedicio. Pri ĝi, sendube, scias ankaŭ la moskvianoj. Azeno estos tiu, kiu supozas, ke la informiteco de la rusoj donos al ni utilon...

— Senduba vero! — suspiris Urquhart.

— Viaj hipokritaj suspiroj nun al nenio helpos! — diris Gyllenstierna. — Mi kunvenigis vin ĉe mi por antaŭsciigo: la ekspedicio al Arĥangelsko estas nuligita. Ĉiuj, kiuj partoprenis ĝian preparadon, povas ricevi sian monon ĝis la morgaŭa tago kaj iri laŭ vojo, kiun sufloros al ili la racio kaj la volo de Dio...

La maljuna eskortulo Golgolsen eĉ malfermis la buŝon pro mirego. La komandanto de ŝipatakaj taĉmentoj kolonelo James, levinte la brovojn, retrokliniĝis al la dorso de la fotelo. Dika ŝipestro Verkolje estis sensence ridetanta.

La eskadrestro estis silente trinkanta kafon.

— Tio estas ĉio, sinjoroj! — diris li, fintrinkinte sian tason kaj leviĝante.

La ŝipestroj ekstaris.

— Tamen, dezirantoj povas resti sur la ŝipoj, por iri al alia navigado — por ekstermo de balenoj. Multaj nun scias, ke balenoj multobliĝis tre abunde kaj ke ili kaŭzas grandan ĝenon al marvojaĝantoj. Ni devas ekstermi ioman kvanton da tiuj kreaĵoj, por ke la aliaj iru pli malproksimen en la maron. Jen ĉiuj niaj taskoj. Ĉu deziras ion demandi sinjoroj ŝipestroj?

Golgolsen palpebrumis, demandis per raŭka baso:

— Mia fregato havas dudek du kanonojn. Provianto kaj batalaj provizaĵoj estis prenitaj por tri monatoj. Nek harpunojn, nek ceterajn balenĉasajn ilojn ni havas. Plej probable, kanonojn kaj batalajn provizaĵojn ni ne bezonos, sed homojn, kiuj scipovas ĉasi balenojn...

La ŝipestroj ekmoviĝis, ekbruis.

— Tio estas vero, *herre* subadmiralo.

— La malsuprajn ferdekojn necesas purigi de pezaj kanonoj...

— Necesas ŝanĝi la ŝarĝojn...

— Ŝipatakaj taĉmentoj postulas grandan rezervon da provianto, kaj se la taĉmentoj ne estos...

Gyllenstierna silentis. Liaj mokaj okuloj estis ĉirkaŭrigardantaj la vizaĝojn de la ŝipestroj.

— Harpunojn kaj konformajn balenĉasajn provizaĵojn vi ricevos de la ekonomo de la eskadro, — diris li. — La ŝipanaroj restu en tiuj kompletoj, en kiuj ili estis varbitaj, krom, memkompreneble, dungitoj, ne dezirantaj ŝanĝi siajn sabrojn al tranĉiloj de balenĉasistoj... Tio estas ĉio, sinjoroj.

Li mallonge riverencis kaj foriris en sian dormoĉambron — rekta, orgojla, en verda uniformo, kun malestima rideto sur la maldikaj lipoj. Interrigardante, levante la ŝultrojn, la perpleksaj, koleraj ŝipestroj estis adiaŭantaj ĉe la ŝtuparo, por disveturi al siaj ŝipoj. Ili estis komprenantaj kaj ne komprenantaj, divenantaj kaj pripensantaj, timante interŝanĝi eĉ kelkajn vortojn. Nur sola Golgolsen grumblis:

— Tiu maljuna pirato tute seniliĝis. Kion li deziras de ni? Se

li ne kredas eĉ nin, li serĉu por si aliajn oficirojn...

2. Balenĉasistoj

Sur la pobkastelo de la kvardek-kanona ŝipo «Kolera urso» klariono en neordinara tempo ekkantis «ĝeneralan kunvenon». El lukoj — dormemaj, ĉirkaŭligitaj en pirata maniero per kaptukoj, ĉifonaj, malpuraj, nudpiedaj, nehaste, unu post la alia ekiris supren matrosoj, artileriistoj, ŝipatakaj soldatoj. Super la lukoj staris ferdekestroj kun skurĝoj — batadis al la dorsoj, peladis ekstari en linion.

Sur la pobkastelo pasumadis ŝipestro Urquhart, en antaŭsento de malagrabla parolo viŝadis per tuko la ruĝvangan vizaĝon, ridetadis afable. Du leŭtenantoj kun pistoloj en profundaj poŝoj por ajna okazo estis pasumantaj apud li. La ekzekutisto akre fiksrigardadis la ŝipanaron — italojn, anglojn, hispanojn, bremenanojn, holandanojn, — ludadis per ponardo. La supera asistanto de la ŝipestro kaj la ĉefa ferdekestro hispano del Robles elkondukis el la poba luko dekduon da siaj buĉistoj, starigis ilin kun blunderbuzoj trans la ferdeka kastelo, singarde komprenigis ilin, kio povas okazi kaj kontraŭ kio necesas gardi sin.

Urquhart afable salutis la ŝipanaron, iris laŭlonge de la linio, diris, ke la ekspedicio al Arĥangelsko estas nuligita, ke la ŝipanaro povas ricevi sian monon jam hodiaŭ por la tuta pasinta tempo.

— Kaj por la estonta? — demandis Birge Kornusa Kruro, ferdeka matroso.

— Li pagu la pasintan, tiam ni parolos pri la estonta! — kriis rufa irlandano.

— La trezoriston sur la ferdekon!

La matrosoj ekbruis ĉiuj kune, la linio rompiĝis. Ŝvelinta pro drinkado, blugriza, kun nuda grizhara brusto dungito Benkt kun alnomo «Murdis Amikon» surfalis la ŝipestron, alpremis lin al la ŝipflanko, demandis, elspirante alkoholodoron:

— Kien do ni nun iru?

— Vi ne finaŭskultis min! — prononcis Urquhart, penante depuŝi de si Murdis Amikon. — Lasu min findiri, damnitaj drinkuloj...

Del Robles detiris Benkt-on de la ŝipestro, la buĉistoj kun blunderbuzoj ekstaris malantaŭ la dorso de Urquhart, la matrosoj kvietiĝis. Sur la pobkastelo aperis la trezoristo kun sia fera kofreto, lin kondukis la leŭtenantoj. Urquhart, reordigante sur si la uniformon, forblovante polverojn de la maniko, ekparolis pri la balenĉasa ekspedicio...

— Ĉu balenoj? Nun? — kriis Birge Kornusa Kruro. — Verŝajne, tempas min ĉeni en frenezulejo, knaboj, ĉar mi nenion komprenas...

La ferdekestro knutis Birge-n al la dorso. La ŝipestro parolis plu.

— En la oceanon eliris la reĝo de balenoj, — diris Urquhart. — Tiu feroca reĝo kaŭzas grandajn plagojn. Krom la naĝiloj kaj la maso de sia korpo, kiu, kiel oni scias, povas disfendi ŝipon duige, la balenreĝo estas armita ankoraŭ per korna glavo kun segilo, per kiu ĝi, nerimarkite alirinte ŝipon, segas la kilon. Saĝo de tiu besto estas tia, ke kun ĝi estas malfacile konkuri eĉ por spertaj balenistoj kaj maraj ĉasistoj. La afero estas en tio, ke la balenreĝo havas kapablon vidi nevideblan, tio estas vidi

penson de homo, intencanta fari malbonon kontraŭ balenoj...

La dungitoj, multfoje servintaj sub nigraj flagoj de piratoj, delongaj krimuloj, al kiuj minacis pendumilo en multaj landoj de Eŭropo, kvazaŭ infanoj, aŭskultis sian ŝipestron. Eĉ Birge Kornusa Kruro, servinta sur balenĉasaj ŝipoj, lamente suspiradis kaj flustre menciadis sanktan Brigita-n, la protektantinon de maristoj. Ŝajne, forbruligi Arĥangelskon estas multe pli simple, ol iri al tia ĉaso...

— Por semi timon en la balena regno, — daŭrigis Urquhart, — grafo Erik Gyllenstierna, subadmiralo de la floto de lia reĝa moŝto, ordonis al ni, liaj servantoj-ŝipestroj, peti vin tamen resti sur la ŝipoj, por ke la maraj vojoj iĝu traireblaj. Plie mi nenion povas al vi diri. Dezirantoj ricevu sian monon de la trezoristo. Se iu el vi ŝanĝos vian decidon kaj revenos sur la ŝipon, mi ĝojos.

La ŝipestro ĝentile riverencis. La matrosoj, interparolante, viciĝis ĉe la trezoristo, apud kiu, laŭ la regularo, staris du kaporaloj kun nudigitaj sabroj. Sur la havenon estis malleviĝanta krepusko, en havenaj tavernoj estis alvoke ekbrulantaj lumoj. Urquhart en sia kajuto estis trinkanta citronan sukon kun sukero kaj rumo kaj diranta al del Robles:

— Ĉiuj revenos sur «Koleran urson». Dum la nokto ili fordrinkos sian monon ĝis lasta groŝo kaj venos reen — manĝaĉi cepan supon kun salviando...

Del Robles konsentis:

— Jes, ili revenos. Sed por kio vi kaj mi bezonas tiun stultan elpensaĵon pri balenoj?

Urquhart ne respondis. Li nur ĵetis rigardon al la hispano,

kaj tiu komprenis ĉion. Ili ellernis kompreni unu la alian, tiuj du homoj, dum jaroj da kunaj navigadoj.

3. Kolivanano Jakobo

En tiu ĉi vespero kaj dum la tuta nokto en Stokholmo oni paroladis nur pri la balenreĝo kaj pri tio, kiel gloraj maristoj de lia reĝa moŝto metos finon al la damnita monstro.

Pri la balenĉasa ekspedicio parolis oni kaj en familiaj domoj ĉe vespera bierkruĉo, kaj en tavernoj, kaj sur galeroj, kaj en la haveno, kaj eĉ en la preĝejo, kie kelkaj pastroj vespere faris predikojn pri kuraĝo de maristoj, purigantaj marajn vojojn disde teruraj monstroj...

Oni parolis malsame: la plej inteligentaj ne uzis vortojn — sufiĉis interpalpebrumi. Iuj laŭdadis la ruzaĵon de la antaŭvidema subadmiralo Gyllenstierna. Triaj suspiradis:

— Ho, tiuj balenoj. Ne malmulte ili kostos por niaj maristoj...

Estis, tamen, ankaŭ tiaj, kiuj kredis al tiu elpensaĵo senrezerve. Sed da tiuj troviĝis ne multe. Eĉ maljunulinoj-avinoj ne timigadis siajn petolantajn nepojn per la balenreĝo.

En vinkelo «Gajaj kompanoj», kiu ĉiam estis malfermita por maristo, havanta monon, kunvenis matrosoj kaj oficiroj preskaŭ de ĉiuj ŝipoj de la eskadro de Gyllenstierna. Ĉi tie la maristoj, kun rido menciante la balenreĝon, frapante per moneroj al la tabloj, postuladis ankoraŭ brandon, bieron, ĝinon, vodkon, manĝadis frititan lardon, frapadis la taverniston al la grasa ŝultro, drinkis kun li je sukceso de la ĉasado, kantadis kantojn kaj, finfine, sub fajfo de kornoj kaj sonorado de

timbaloj komencis danci anglan ĵigon. La taverno skuiĝis pro bruo. Matrosoj kaj oficiroj estis brue fordrinkantaj sian monon: ne indas reveni sur la ŝipon, havante almenaŭ groŝon en la monujo, — tiel diras malnova flota antaŭsigno.

En angulo, apud la kameno, kie estis iomete malpli brue, helpanto de la tavernisto Jakobo — ankoraŭ juna homo kun saĝa kaj obstina rigardo de la grizaj okuloj — estis plendanta al leŭtenanto Olof Brems pri sia malgaja vivo.

— Ĉiutage la samo! — estis diranta li. — Formetu, kaj alportu, kaj lavu kruĉojn, kaj portu al ŝipestro de galero sep botelojn da rumo, kaj sur fregaton bareleton da ĝino, kaj sur jaĥto postulu de la ŝipestro ŝuldon. Aŭ jen ĉi tie, — nu, kio estas bona, juĝu vi mem, *herre* Brems....

La leŭtenanto estis ebria. Krom tio, li havis nemalgrandan ŝuldon al la tavernisto, kaj tiu cirkonstanco, ke Jakobo ne postulas la ŝuldon, estis agrabla por li. Kaj ĝenerale la ulo per io plaĉis al la leŭtenanto, — eble, per sia obstina rigardo.

— Nemalbone dancas tiu grandega matroso! — diris la leŭtenanto.

Jakobo turniĝis.

— Oni nomas lin Murdis Amikon, — daŭrigis la babilema leŭtenanto. — Ie en fremda lando li ne dividis ormonerojn kun sia amiko kaj enpikis tranĉilon en lian gorĝon. Liaj manoj estas en sango ĝis la kubutoj.

Jakobo ne respondis. Olof silente ekrigardis al li.

— Ĉu vi estas svedo? — demandis la leŭtenanto.

— Mi estas kolivanano, *herre* leŭtenanto.

— Kion signifas — kolivanano?

La helpanto de la tavernisto ne emis babili pri Kolivano, sed la leŭtenanto fiksiĝis sur tio:

— Respondu, kion signifas kolivanano?

— El urbo Kolivano, — jen kion signifas, *herre* leŭtenanto.

— Tia urbo ne ekzistas.

— Kiam mi naskiĝis, ĝi estis.

— Estis urbo Revalo. Respondu, ĉu estis?

— Urbo Revalo estas.

— Jes, estas. Tio estas bona urbo.

— Bona! — konfirmis Jakobo.

— Se vi estas el Revalo — do, vi estas estono?

Jakobo silentis, rigardante al la dancantoj.

— Vi estas estono! — diris la leŭtenanto. — Vi havas helajn harojn kaj grizajn okulojn. Ĉiuj estonoj estas helharaj. Tio ne estas malbona, ke vi ne estas svedo. La estonoj kvankam estas malpli bonaj ol svedoj, tamen servi ili povas. Sur grandaj ŝipoj estas postenoj de bufedistoj. Ĝuste tien ni vin postenigos...

— Mi dankas vin, *herre* leŭtenanto! — modeste diris Jakobo.

— Jes, Revalo! — diris Olof Brems. — Certe... mi estis tie antaŭ ne tiom longe, ĝuste kiam oni alpelis rusajn militkaptitojn de Narvo. Lia moŝto nia reĝo ordonis per nenio manĝigi la moskvianojn, ĉar ili estas kutimigitaj nutri sin per arba ŝelo kaj neĝo. Oni pelis ilin piede de Narvo mem, tiujn barbarojn, kaj estis sufiĉe malvarme...

La helpanto de bufedisto ne deŝiradis nun sian obstinan rigardon de la vizaĝo de la leŭtenanto...

— Estis sufiĉe malvarme, — ripetis li per glata voĉo.

— Jes, frosto. Ili tute freneziĝis dum la irado. Sed la urbestro de Revalo ricevis ordonon de la general-intendanto armi ĉiujn estonojn kaj, se la moskvianoj petos panon, — simple pafi...

— Simple pafi?

— La plej simpla afero! Ili manĝu arban ŝelon...

— Ŝelon! — kvazaŭ eĥo ripetis Jakobo. — Kaj ĉu estonoj pafis al ili?

— Ne, sed ni pafis, se vidis tiujn barbarojn sur nia vojo. Dankon al Disinjoro, ili nelonge estis tie. Oni pelis ilin al minejoj kaj disdonis al riĉaj kamparanoj, kiel oni disdonas laborantan brutaron... Mi mem prenis por mia patro du moskvianojn... Mi servas al la krono en la floto, mi estas maristo, devas ja iu labori en la bieno...

Kaj la leŭtenanto frapis per la pugno la tablon.

— Maristoj — estas homoj! — diris li. — Sed ne ĉiaj maristoj estas homoj. Homoj estas la svedaj maristoj. Ĉiuj ceteraj maristoj kune ne valoras eĉ groŝon. Sveda maristo estas maristo! Ĉu prave mi diras aŭ ne, — respondu al mi, Jakobo el la kelo «Gajaj kompanoj»!

— Mi dezirus, *herre* leŭtenanto, esti maristo! — respondis Jakobo. — Se vi permesas, *herre* leŭtenanto, mi tre dezirus esti maristo. Se vi irus en Arĥangelskon, mi petus preni min al vi. Ja tio estas milita ekspedicio, *herre* leŭtenanto, en kiu,

sendube, eblas distingiĝi antaŭ la krono...

Leŭtenanto Brems verŝis en sian kruĉon brandon, almetis al ĝi bieron kaj eltrinkis unuglute.

— Vi ne estas stulta! — diris li, frapinte per la kruĉo la tablon. — Maristo — estas bona laboro. En la poŝo de maristo iam io tintas, ĉu?

Jakobo kapjesis:

— Certe, *herre*! Sed vera homo estas la milita maristo!

— Vi estas saĝa knabo! — diris Olof Brems. — Eble, en via vivo okazos ŝanĝo...

La kolivanano Jakobo rigardis atende.

— Jes! Aŭ mi ne estos leŭtenanto! Jen kiel! Verŝu en mian glason ankoraŭ tiun aĉaĵon!

Nun li eltrinkis brandon, ne diluante ĝin per biero.

— Jakobo, ĉu vi longe sidos tie? — kriis la tavernisto. — Oni min disŝiras je pecoj, sed li sidaĉas...

Jakobo sendezire ekiris al la bufedo. Du matrosoj el fregato «Dia sonorado» estis dancantaj novan dancon — alemandon. Unu matroso estis prezentanta damon, la alia — viran kundancanton. En la kelo staris densa ridego, la «damo» tre ridinde grimacadis kaj montradis al la kunulo sian favoron. Kaj al la kunulo, evidente, ŝi estis abomena, tiu «damo» kun ruĝa pro drinkado nazo kaj disŝirita orelo.

Al leŭtenanto Brems alsidiĝis alia leŭtenanto el jaĥto «Petola Kupido» — Johan Morat. Li estis ebria ĝis tiom, ke ne tuj rekonis sian malnovan amikon leŭtenanton Brems-on. Unue li opiniis tiun la ekonomo de la eskadro, poste — sia propra

frato.

— Por vi, kiel mi pensas, tempas iri sur la ŝipon! — diris leŭtenanto Brems.

— Al diablo! — respondis Morat.

— Ĉu vi estas kolera? — demandis Brems.

— Jes, kolera... Balenoj... kiaj balenoj? Ĉu ekzistas tiaj balenoj? Balenreĝo...

La tavernista helpanto Jakobo ree alsidiĝis al la leŭtenantoj. Olof Brems trinkis ankoraŭ brandon. Purpura pro drinkaĵo Morat estis roranta per raŭka baso:

— Balenoj? Mi ne estas stultulo, jen kio! Mi navigas dum dek ses jaroj... Ni iras samloken, kien ni iris. Sed ni bezonas, ke neniu sciu... Ĉi tie ĉiuj estas propraj, aŭskultu min, se vi deziras scii la veron: por kio tia floto iru al balenĉaso? Kie oni vidis tion? Nur ŝtipkapuloj aŭ flavbekuloj povas kredi al fabeloj pri balena regno...

— Balena regno ekzistas! — diris obstina Jakobo.

— Sed mi diras — ne! — kriis Morat.

— Sed vi tamen iras al ĉasado? — demandis Jakobo.

— Jes, knabo, ni iras al ĉasado! — kriis la ruĝvizaĝaĉa ulo kun orelringo. — Kaj mi ne estu Bill Harwood, se mi ne revenos post ĝi riĉa, kiel kvardek mil diabloj kun Belzebuto kune...

Ĉe la najbara tablo matrosoj kunigis la kruĉojn:

— Je rusa oro en niaj poŝoj!

— Eternan gloron por riĉulo!

— Vivu la arĥangelskaj balenoj!

— Ni ne abomenos ĉervoncojn de la moskvia caro...

— Jen, aŭdu, kion diras la homoj! — kriis Morat. — Ja ili nemalmulte navigis dum sia vivo.

Kaj leŭtenanto Morat ekiris drinki kun siaj matrosoj.

— Ĉu tamen en Arĥangelskon? — penseme demandis Jakobo. — Vi, li diras, iras al Arĥangelsko...

Leŭtenanto Olof Brems malbone vidis sian kunparolanton. Iam Jakobo disduiĝadis en liaj okuloj, poste subite transformiĝadis al subadmiralo mem grafo Gyllenstierna, poste iĝadis tre granda, simila al baleno...

— *Herre* leŭtenanto! — petis Jakobo. — Prenu min sur vian ŝipon.

La leŭtenanto larĝe ridetis, montrante la flavajn dentojn.

— Estas nenio pli simpla, knabo. La nomo de Olof Brems ion valoras en nia floto, mi ĵuras per mia spado...

— Ĉu vi promesas, *herre* leŭtenanto!

— Kion?

— Preni min sur vian ŝipon?

— Knaboj, — kriis la leŭtenanto. — Knaboj! Tiu ulo deziras esti nia. Jen tiu helpanto de tavernisto deziras esti maristo! Kion vi diros pri tio?

La matrosoj turniĝis al la leŭtenanto. Brems ordonis al Jakobo leviĝi, por ke ĉiuj vidu, kia li estas. Jakobo leviĝis kaj per trankvila, obstina rigardo ĉirkaŭrigardis la tavernon.

— Mi ne lasos lin! — kriis la tavernisto. — Por kio li

bezonas vian maron! Al li ankaŭ ĉi tie estas nemalbone. Tiel, se ĉiuj ekdeziros esti maristoj, tiam kiu laboros sur sektero...

Sed la taverniston oni ne lasis paroli — Benkt Murdis Amikon ĵetis al li stanan teleron, kaj Birge Kornusa Kruro miaŭis kiel kato, al kiu oni surpaŝis la voston...

— Vi devas bone regali viajn estontajn kunnavigantojn! — prononcis la leŭtenanto. — Ne ŝparu por tiuj diabloj vian drinkaĵon, kaj ili iĝos por vi bonaj amikoj...

— Bonaj amikoj, — kiel eĥo ripetis Jakobo kaj levis super la tablo grandan botelon da rumo, ĉirkaŭplektitan per maldikaj vergoj.

La matrosoj, faligante benkojn kaj taburetojn, ĵetiĝis al la senpaga regalo. Jakobo sen avari plenigadis kruĉon post kruĉo, kaj tuta tiu kanajlaro drinkis je la sano de la estonta maristo.

— Ĉiam estu dek futoj da akvo sub la kilo! — ekdormante en sia angulo, estis balbutanta leŭtenanto Olof Brems. — Necesas drinki nur je dek futoj...

Tamburino ekbatis ĵigon.

Novaj gastoj eniris en la tavernon.

Jakobo staris, apoginte sin sur ŝima muro, kaj pensadis sian penson. Tiu koncentrita kaj morna vizaĝo subite kolerigis la taverniston.

— Vi ree nenion faras! — kriis li. — Damnita maristo! Dume vi ne ricevis vian monon kaj riskas ne ricevi eĉ groŝon, se ne laboros en tiu ĉi nokto. Donu al tiuj diabloj ĝinon kaj bieron...

La tamburino plu batadis ĵigon.

Tavernaj putinoj en kufoj kun buntaj rubandoj dancadis, alte levante la krurojn, fulgadis kaj krakadis sebaj kandeloj en rustaj feraj kandelingoj, sur la ŝtona planko kuŝaĉis vitropecoj kaj kruĉoj, estis disfluanta granda ruma flako. Benkt Murdis Amikon trenadis sin de unu tablo al alia, levadis la pugnon, surkreskitan de haroj, postuladis:

— Regalu min, ĉar tiel ordonis Marteno Lutero.

— Ĉu Marteno Lutero?

— Kiu ne ŝatas vinon, virinojn kaj kantojn, tiu restos stultulo por la tuta sia vivo, — tiel diras Lutero. — Kaj mono finiĝis al mi. Do kiel mi plenumu la precepton?

4. Adiaŭo kun Stokholmo

Laŭ knarantaj, frotitaj ŝtupoj Jakobo rapide leviĝis en la ĉambrojn de la tavernisto. El ĉi tie, el fenestroj de tiu alta domo estis videbla la maro kaj mallarĝaj, helaj, flirtantaj sur mastoj ŝipaj flagoj. Jam leviĝis la suno, malsupre estis bruanta, vekiĝante, la urbo, tondris sur pavimŝtonoj radoj de grandegaj, kovritaj per feraj bendoj ŝarĝoĉaregoj, henis ĉevaloj de karbovendistoj, vendistinoj de legomoj kaj de lakto estis laŭdantaj per diversaj voĉoj siajn varojn; videblis, kiel manĝas dum irado ĉarpentistoj, kiel ekiris en la havenon doganaj skribistoj, kiel trarajdis por ŝanĝi la noktajn gardantojn reĝaj dragonoj. El strateto, kun korbo de freŝaj panoj sub la brako, trakuris konata submajstro de bakisto Krinker. Kun kanto trairis masonistoj, kaj la sindiko de ilia gildo majstro Doring svingis al Jakobo per la mano. «Hodiaŭ li venos drinki ŝulde unu aŭ du glasetojn, — pensis Jakobo. — La magistrato malbone pagas al tiuj malriĉuloj pro ilia laboro. Ĉiam malpli

multe da mono estas en Svedio». Post la masonistoj trairis forĝistoj kun siaj marteloj, tenajloj kaj balgoj sur puŝĉaretoj. Multaj honestaj laborantoj vivis en tiu ĉi urbo, en tiu granda, bela, riĉa urbo, kie ĉiam odoris je maro kaj de kie konstante foriradis ŝipoj al malproksimaj mirindaj landoj. Multajn homojn ĉi tie bone konis Jakobo, kaj multaj konis lin — simplan ulon, tavernan serviston, plenan orfon...

Li ridetis, plu rigardante en la fenestron: kiel mirus ili, ekvidinte lin sur eŝafodo, kiel ne kredus siajn okulojn kaj longe post la ekzekuto vespere paroladus pri li flustre, balancante siajn kapojn en noktoĉapoj. Ne, li penos ne trafi en la manegojn de la ekzekutisto, la respektinda ekzekutisto de urbo Stokholmo — paĉjo Frederiko, kiel oni nomas lin ĉi tie, — serĉu por si alian simplulon.

Mara vento estis flirtiganta liajn malpezajn harojn, li plu rigardis kaj rigardis en la fenestron, al la urbo, kie pasis tiom da jaroj de lia vivo: ne, li per nenio kulpas antaŭ ili, antaŭ siaj konataj urbanoj. Kaj apenaŭ ili pensos pri li malbone. Ili ne tro ŝatas dungitojn-maristojn, tiujn piratojn kaj rabistojn de grandaj vojoj, por kiuj nenion kostas murdi homon. Sen admiro ili rigardas al paradoj de rajdistoj kaj dragonoj, al la reĝa gvardio kaj al la malpeza infanterio. Ĉiam pli multekosta iĝas la vivo, ĉiam pli da junaj knaboj estas pelataj al milito, kaj ĉio ĉi nur por ke pri Karolo XII oni diru kiel pri Aleksandro la Makedona...

— Vi jam estas ĉi tie, — diris post lia dorso la tavernisto.

— Mi estas ĉi tie...

Plendante pri damnita anhelado, la tavernisto eksidis en sian fotelon ĉe la tablo kaj komencis, flustrante, kalkuli la noktan

enspezon. Li dismetadis monerojn per kolonetoj laŭ valoro kaj karese glatumadis ilin. Poste, dirinte super la mono mallongan preĝon, li transŝutis ilin en saketojn kaj metis en kaŝujon. Kiel ĉiam post tiu laboro, li rimarkeble gajiĝis kaj demandis karese:

— Ĉu vi firme decidis foriri de mi, knabo?

— Jes, oĉjo Grejs, firme.

— Ĉu vi decidis nepre iĝi maristo?

— Jes, mi decidis iĝi maristo.

— Maristoj ofte pereas en mara abismo. Maristojn oni mortigas en bataloj. La eskadron, en kiun vi iros, povas frakasi malamikoj...

— Ĉu vi tiel pensas?

— Ĉio okazas en batalo! — singarde respondis la tavernisto. — La vojoj de Dio estas nedifineblaj...

— La reĝo de Svedio estas nevenkebla! — diris Jakobo. — Ĉu vi pri tio dubas, oĉjo Grejs?

La tavernisto haste konsentis kun tio, ke la reĝo de Svedio estas nevenkebla. Li tenis la tavernon delonge kaj sciis, kio okazas al homoj, kiuj dubas pri reĝoj.

— Kio ajn okazu, — diris li, — sciu unu aferon: mi akceptos vin en ajna horo. Vi estas nemalbona knabo, vi nun estas preskaŭ ne moskviano. Oni povas opinii vin svedo. Certe, se vi konvertiĝus al luteranismo...

La tavernisto suspiris:

— Kun tempo vi komprenos ankaŭ tion. Servante en la floto, vi devos alpreni luteranismon... Kion ankoraŭ mi konsilu

al vi por adiaŭo? Mi povas, verŝajne, konsili al vi ne trafi en kaptitecon al moskvianoj. La moskvianoj estas barbaroj, kaj kvankam en vi fluas rusa sango, sango de slavo, ili, sendube, kruele punos vin. Se ili vin pendumos, mi tutanime bedaŭros...

— Mi dankas vin! — diris Jakobo. — Vi ĉiam estis bonkora al mi.

— Mi estis bonkora al vi, jes! — ree suspiris la tavernisto. — Mi kompatis vin, orfon. Multaj min riproĉadis tiam, ke mi estas tiom kompatema, sed kion mi povis fari kun mia koro?

— Vi estas bonkora homo! — konsentis Jakobo. — Vi ĉiam iun kompatadis kaj donadis laboron pro panpeco aŭ bovlo da hordea kaĉo...

La tavernisto suspekteme ekrigardis al Jakobo: eble, la kolivanano mokas lin? Ne, Jakobo ne mokis. Li havis seriozan vizaĝon.

— Jes, siatempe mi savis vian vivon! — ree ekparolis la tavernisto. — Kaj helpis al vi trovi bonan vojon. Vi tion devas memori ĉiam. Mi ne abomenis vin, neniom abomenis...

Jakobo silentis. La tavernisto ankoraŭ parolis iom pri Moskvio kaj pri tio, ke la plej bona popolo estas la svedoj, Jakobo rigardis en la fenestron — al ŝipoj. Lia koro batis: tiuj ŝipoj iros en Rusion. Tie li dormos trankvile — dum tuta nokto, aŭ semajno, aŭ eĉ pli. Li ne pensados, ke iu aŭdis, kiel li deliris en dormo. Al li ne ŝajnos ĉie sekretaj agentoj de la reĝo. Ankoraŭ nemulte — kaj li jam ne eltenus. Li komencis labori malpli bone, ol antaŭe. Li povas ekscesi pro bagatelo, kaj tiam al ĉio venos fino...

— Kial vi ne aŭskultas min? — demandis la tavernisto. —

Ĉu vi ree pri io pensas? Vi eterne pensas...

Post frua matenmanĝo la tavernisto malkovris sian kaŝujon kaj komencis denove kalkuli monon. Li kalkuladis longe, enpensiĝadis kaj ree kalkuladis.

— Jen al vi ĉio, kion mi ŝuldas al vi! — diris li afable. — Mi esperas, vi restos kontenta?

Jakobo ĵetis sur la polmo la tri monerojn.

— Tamen ĉu vi ne eraris?

— Ĉu mi donis al vi tro multe?

Nun Jakobo estis ridetanta gaje. Tiel gaje, ke la tavernisto konfuziĝis. Ankoraŭ neniam dum tiuj ĉi jaroj Jakobo ridetis tiel larĝe kaj serene, kiel nun.

— Ĉu vi memoras, kia mi trovis vin en Kolivano? — demandis la tavernisto. — Ĉu vi tiam almenaŭ per io kompensis tiun panon, kiun vi manĝis?

Jakobo ridetadis, rigardante en la okulojn de la tavernisto.

— Vi tiam tre multe manĝis kaj malmulte laboris. Kaj mi ja ankoraŭ vestadis vin, se vi memoras? Dek jaroj ion kostas, ĉu vere? Poste vi donadis al aĉetantoj ŝulde rumon, brandon, vodkon, kaj ne ĉiuj al vi redonadis monon. Sed la varo ja estis mia?

— Via. Mi disportadis ĝin laŭ viaj ordonoj...

— Sed nun, se vi foriras de mi, mi ne povas rekolekti tiujn ŝuldojn. Ĉu tiel? Mi ankaŭ ilin kalkulis. Vi ĉiam manĝadis kune kun mi, ja vi ne negos tion? Nu, kaj finfine, viaj samgentanoj — tiuj malfeliĉaj militkaptitoj? Vi ĉiam por ili ion petadis...

Jakobo estis plu ridetanta. La rideto kvazaŭ algluiĝis al lia vizaĝo. Sed la okuloj ne estis ridetantaj. La okuloj rigardis kun la ĉiama esprimo de obstino.

— Do ricevu tiom, kiom mi ŝuldas! — diris la tavernisto. — Mi neniam trompis iun ajn...

Jakobo metis la monon en la poŝon, ekstaris.

— Nu, dankon!

— Ĉu vi, ŝajne, estas malkontenta?

— Ne, mi estas kontenta! — diris Jakobo. — Mi estas tre kontenta, oĉjo Grejs!

— Sed vi estas ne tro kontenta?

— Ne, mi estas kontenta! — ripetis Jakobo. — Certe, vi ne multe prenis pro tio, ke vi ne denuncis min, kiam komenciĝis la milito kontraŭ la rusoj. Tiam al mi estus multe pli malbone...

— Do, vidu! — vigliĝis la tavernisto. — Kaj tio estis ne tiom simpla por mi. Mi multon riskis, vi ne povas ne kompreni tion...

— Do, mi diras, — daŭrigis Jakobo, — al mi estus pli malbone. Kaj tiele mi konservis la kapon. Tial mi estas kontenta kaj tre danka al vi...

— Se mi denuncus, kiu vi estas, — diris la tavernisto gravmiene, — tiam vi, certe, ne havus la kapon sur la ŝultroj. Vin oni prenus sur galerojn aŭ ien en pli teruran lokon. Kaj kio estas tio, vi vidis mem...

— Jes, mi vidis! — konsentis Jakobo.

— Do, ĉu vi estas danka al mi?

— Jes, *herre*, tre danka.

— Nu, tiam adiaŭ, mi kuŝiĝos dormi. Vi ja hodiaŭ babilis dum la tuta nokto kun tiuj friponoj kaj drinkuloj, sed mi laboris. Por vi, verŝajne, jam tempas iri sur la ŝipon?

— Jes, al mi tempas iri sur la ŝipon! — respondis Jakobo. — Ĉiuj miaj aferoj estas faritaj...

La tavernisto subite frapis sin al la frunto:

— Aŭskultu, Jakobo! — ekkriis li. — Sed kiu ja portos tagmanĝon al la rusa princo en lian rezidejon? Ja tion ne faros la kuiristo. Kaj mi ne povas — ja mi estas sindiko de la gildo de tavernistoj, tio ja ion signifas. Morgaŭ al mi venos nova servisto, sed hodiaŭ?

Jakobo silentis. Eblis pensi, ke li ne deziras porti la tagmanĝon.

— Mi portus, — diris li finfine, — sed ree ĉi tien venos tiu sekreta agento kaj komencos pridemandi, por kio mi iras en la princan rezidejon. La kuiristo rakontis, ke li jam dufoje parolis kun li... Al mi tio estas malagrabla, mastro, la sekreta agento povas rompi mian estontan vivon en la reĝa floto...

La tavernisto ĵuris, ke neniu rompos ion ajn al Jakobo. Ĉiuj scias, ke Jakobo portas tagmanĝojn al la princo ne laŭ sia deziro. Kaj sekretaj agentoj nun ŝovas siajn nazojn ĉien, tia estas tempo, — milito.

Finfine Jakobo konsentis, kvankam kun malkontento. En la kuirejo la kuiristo metis en bovlon pecon da rostita ŝafaĵo kun ajlo kaj envolvis en tukon du pirogojn.

— Ĉu ne malmulte? — demandis Jakobo.

— Li danku pro tio, ke mi ne manĝigas lin per hordea supo! — diris la kuiristo. — Mi estas bona svedo, kaj al mi estas abomene pensi, ke tiu moskviano grasiĝas pro manĝaĵo, kuirata de miaj manoj...

— Sed tamen li pagas grandan monon! — kontraŭdiris Jakobo.

Tio estis nesingarda. La kuiristo ĵetis truan ĉerpokuleron kaj turniĝis al Jakobo.

— Kiel mi vidas, la agento ne vane venadis ĉi tien! — kriis li. — Tro vi defendas tiun princon. Sed por li estas loko sur eŝafodo, jes, jes, pri li delonge sopiras paĉjo Frederiko, kaj pri vi same. Vi kun tiu princo, verŝajne, kunas, li pagas al vi per rusa oro, kaj vi al li rakontas ĉion, kion vi sukcesas ekscii...

— Kaj ĉu vi envias? Vi mem volonte dungiĝus pro oro, sed vin neniu prenas...

La kuiristo faris paŝon al Jakobo. Tiu staris senmove, subridante kaj rigardante al la kuiristo per siaj obstinaj, subite malheliĝintaj okuloj.

— Iru for! — ordonis la kuiristo. — Iru for, ĉar miaj manoj tremas pro furiozo. Foriru tuj...

— Azeno! — diris Jakobo. — Azeno, jen kiu vi estas! Maljuna stultulo...

Li eliris el la kuirejo.

Apud la domo lin neniu atendis, malkiel okazadis en la lastaj tagoj, kaj li suspiris kun faciliĝo. Survoje en butiko la helpanto de tavernisto aĉetis stakon da plej bona papero, ligaĵon da plumoj kaj botelon da vodko. Sur perono de humida

kaj putra domo, en kiu estis tenata la rusa reprezentanto princo Ĥilkov, du gardistoj estis ludantaj ĵetkubojn. Jakobo ĝentile salutis kaj laŭdis la veteron, sed la gardistoj respondis tre mallonge kaj ekrigardis al li tiel, kvazaŭ vidis lin unuafoje.

— Mi alportis al vi donacon! — diris Jakobo.

— Vi povas mem trinki vian vodkon! — respondis la pli aĝa gardisto.

— Jes, vi povas mem ĝin lektrinki! — konfirmis la dua kaj deŝovis de si la botelon, sed tiel, ke ĝi ne falu de la perono kaj ne frakasiĝu.

— Ho! — ekkriis la helpanto de tavernisto. — Ĉu mi per io kulpis? Aŭ vodko, kiun mi alportas, estas nesufiĉe bona? Aŭ ĝi estas malmulta?

Ambaŭ gardistoj interrigardis, kaj tiu, kiu estis malpli aĝa, diris severe:

— Portu la tagmanĝon kaj foriraĉu rapide! Ne sidaĉu tie!

«Ankaŭ tiuj ĉi estas avertitaj! — pensis Jakobo. — Malbonas miaj aferoj. Mi estas libera dum lastaj horoj. Kaj se oni min kaptos — tiam rekte en la manegojn de paĉjo Frederiko».

Kiam Jakobo eniris, Ĥilkov, tenante en la maldekstra mano estingiĝintan pipon, estis diktanta al la sekretario de la rusia ambasado Malkiev:

— El tieaj civitanoj negocisto, komercinta per mola varo, Kosmo Minin[109]...

---

109 Kosmo Minin (?–1616) — iniciatinto de kreo kaj unu el gvidantoj de la Dua milicio de 1611–1612 en la epoko de Granda Malordo en la Rusa regno; rusa nacia heroo.

— Minin, — ripetis, trempante la plumon en inkujo, Malkiev...

Andreo Jakovleviĉ kapsalutis Jakobon kaj por momento enpensiĝis, poste daŭrigis:

— Minin, alnomata Seka Brako, ekstarinte meze de popolo sur placo, diris al la homoj: «Ni vidas finan de la Rusa ŝtato ruinigon, kaj helpon el nenie esperas, pro kio mi al vi konsilas kaj petas — monon de ĉiuj ni ĝis la lasta havaĵo preni»... Ĉu vi skribis?

— Mi hastas! — respondis Malkiev.

— «Ĝis la lasta havaĵo preni, edzinojn kaj infanojn kiel garantiaĵon lasi kaj, kolektinte la monon, militestron por ni serĉi, por kun li iri al Moskvo purigi ĉi urbon nian disde la malamiko»...

Malkiev estis skribanta, starante ĉe pupitro, farita el krudaj pinaj tabuloj. Ĥilkov estis sen peruko, en kamizolo el mola ledo, la kolo estis ĉirkaŭligita per varma fulardo: la princo fartis malbone, kaj sakoj sub la okuloj iĝis eĉ pli pezaj, ol antaŭe. Estis videble, ke li tute malsaniĝis. Dum li diktis, Jakobo pensis pri tio, kiel malfacile estos nun diri al Andreo Jakovleviĉ, ke li intencas forlasi Stokholmon kaj ke la princo devos resti sen lia helpo...

— Nu, iru, Malkiev, — diris la princo al la sekretario, — iru, amiko, multe hodiaŭ laboris vi kaj mi, ripozu dume...

La ambasada sekretario riverencis, ekiris al la pordo. Lia vizaĝo per io malplaĉis al Jakobo, tiu akompanis lin per malfidema rigardo kaj turniĝis al Ĥilkov.

— De kie ĉi sinjoro estas ĉi tie?

— Li petis iri al mi por helpi laboron mian...

— Ĉu li multe scias?

— De kie li sciu, se li eĉ en kronikojn ne rigardis. Diras — mi, li skribas. Necesas la tempon, amiko, uzi kun hasto, ĉar minacas la reĝo meti nin en subteraĵon de iu fortreso en urbo Vesteras kaj kvazaŭ destinita estas por mi karcero...

— Ĉu por vi sola?

— Kvazaŭ tiel. Hieraŭ estis ĉi tie de la reĝo sendito. De la nomo de sia monarĥo Karolo la Dekdua diradis li al mi diversajn komplimentojn kaj promesadis, se mi konvertiĝos al luteranismo, postenon ĉe Karolo — kiel konsilisto reĝa pri aferoj de Moskvio...

— Nu?

— Mi al li, en malgaja estante animstato, iun rusan insultaĵon diris, kaj ĉar li ĝin ne komprenis, mi tiun insultaĵon per latinaj literoj skribis kaj enmanigis. Kaj hodiaŭ matene jam tute malbone iĝis, promesas oni al mi grandan koleron de via Karlo...

Kaj, svinginte la manon, Ĥilkov aldonis senzorge:

— Ja al diablo lin, Karlon. Pri alio ni parolos...

— Pri kio? — ridetante, demandis Jakobo.

Pri la forveturo necesis diri tuj, sed Jakobo plu ne kuraĝis, silente aŭskultadis plendojn de Ĥilkov pri tio, ke ĉe la mano ne estas tiuj notoj kaj kopioj de kronikoj, kiujn kolektis li en Moskvo, kaj la memoro nun ne ĉion konservas.

— Ĉu vi kredas, — kolere subridante, diradis Andreo Jakovleviĉ, — en noktoj mi ĉiam la saman sonĝon vidas, tio

tedis min, sed mi ne povas liberiĝi: kvazaŭ ricevis mi el Moskvo de mia maljuna instruisto Poluektov Rodiono Kirilovič necesajn por mi kopiojn de kronikoj. Kaj tiel estas facile por mia animo, tiel bone, kvazaŭ estas ia festo. Sed kiam mi vekiĝas — malbone, kiam mi vekiĝas — mi scias: nun ne eblas ricevi, nun longe ne eblos ricevi. Mi skribis en la reĝan kancelarion, petis kelkajn niajn librojn — oni respondis per orgojla rifuzo. Tamen la jaroj pasas, kiom ankoraŭ la milito daŭros, — juĝu vi mem, ĉu estas gaje vivi senage, ŝlosita sub gardo.

Malfacile paŝante per la ŝvelintaj piedoj sur putraj plankotabuloj, ŝovinte la manojn en la larĝajn manikojn de sia varma kamizolo, kuntiriĝinte pro febro, Ĥilkov per firma voĉo estis diranta, ke la sola afero, danke al kiu li vivas kaj ankoraŭ esperas vivi iomete, estas la skribado de la verko «Kerno de la historio Rusia», sed ke ĉiutage aperas ĉiam pli multaj obstakloj, kontraŭ kiuj mankas fortoj batali. Pasis nun onidiro, ke lin, Andreon Jakovleviĉ-on, oni nepre senigos je plumoj, inkoj, papero, — sur kio li tiam skribos plu? Sed la libro estas tute ne finita, skribita dume estas ne ĉio kaj eĉ ne netigita...

— Papero jen, ĉi tie estas multe! — diris Jakobo, metante sur la tablon la stakon. — Por longe sufiĉos!

— Multe oni malpermesas havi, — respondis Ĥilkov, — verŝajne, oni skoldos...

— Kaŝi necesas, disŝovi en diversajn angulojn, por ke ne kune ĝi estu...

Ĥilkov subite kun suspekto ekrigardis al Jakobo.

— Tio signifas, vi ne plu alportos? — demandis li mallaŭte.

— Ne alportos.

Ili silentis iom. Ja malfacile estas konversacii, kiam unu el la amikoj forveturas, kaj la alia restas.

Jakobo mallonge rakontis pri siaj planoj.

— Nu, se tiel, — severe ekparolis Ĥilkov, — en Kopenhago vi vidos Izmajlov-on. Diru al li de mia nomo, ne, ne de mia! Ne por mi, mi pensas, mi tion faras, — li trovu ĉi tie iujn monavidulojn, donu al ili monon, por ke oni al mi skribi ne malpermesu. Kaj se li mem timos, al Moskvo li skribu.

— Mi komprenis, — diris Jakobo kaj leviĝis.

— Kial vi ekhastis foriri?

— Ne povas mi plu resti ĉi tie, — diris Jakobo. — Se ne hodiaŭ, do morgaŭ oni min kaptos. Ĉu ili eksciis ion aŭ simple timas — mi ne scias, sed tamen oni min tre atentas...

Ĥilkov subridis:

— Avertis mi vin, karan amikon, ne brulvundiĝu! Kuraĝa vi estas tro kaj ĉie ĉion mem faras. Kaj al galeroj, kaj leterojn sekretajn, kaj en urboj — kie kiaj ŝipoj estas konstruataj, kaj pri kanona gisado...

Jakobo respondis obstine:

— Se estas milito, ne eblas prokrasti. Kaj vere, kiom longe mi faradis sentime: evidente, venis tempo, sufiĉe mi promenadis en la sveda reĝlando.

Andreo Jakovleviĉ glatigis la griziĝantajn lipharojn, eksidis apud Jakobo, brakumis lin je la ŝultroj, diris per elkora voĉo:

— La nomojn ne memorfiksu, diru simple — konsilo. Tiele,

amiko bona... Diru ankoraŭ: enviis Andreo Jakovleviĉ al galeraj bagnuloj. El ili kiu estas pli kuraĝa — fuĝas, sed Ĥilkov neniel povas fuĝi, du gardistoj — tage, kvar — nokte, kaj kradoj, kaj la ukazo de la reĝo — gardi kontinue sub minaco de morto. Nu, kaj la piedoj ŝvelas... Do, adiaŭ, bravulo. Estis vi al mi amiko, multe helpis, multajn bonajn minutojn, eĉ horojn, pasigis ni kune...

Andreo Jakovleviĉ prenis Jakobon per la polmoj je la vangoj, kisis. Jakobo ekparolis, retenante emocion:

— Estu en trankvilo, Andreo Jakovleviĉ. Mi ĉion, kiel vi ordonis, faros. Nenion forgesos. Kaj ankoraŭ mi diru: mi neniam forgesos, kiel rakontadis vi al mi mallongajn epizodojn el la historio rusia, kiel respondadis miajn demandojn, kiujn tiom multe mi faradis, kiel lastan vian monon donadis al mi por malfeliĉaj kaptitoj.

— Nu, nu, — haltigis Ĥilkov. — Kion vi pensas, — ĉu ruso al ruso en fremda lando ne helpos, tiam, frato, al la mondo fino venus. Iru. Adiaŭ. Dankon pro ĉio, kion vi faris!

Kiam Jakobo estis jam ĉe la pordo kaj eĉ prenis per la mano la krampon, Ĥilkov subite vokis lin:

— Haltu, atendu!

— Mi atendas!

Li returniĝis. La princo, ridetante, silentis...

— Kion vi volas, Andreo Jakovleviĉ?

— La lastan leteron, kiun vi de mi sendis, la sekretan, ĉu vi ne konas?

— Ne konas, princo.

— Vere, vi ne konas. Saĝa letero, taŭgos, mi pensas, al la niaj. Pri piloto tie temas. Por ke oni bonan piloton trovu...

— Kian piloton?

— Vi ekscios siatempe. Aĥ, ĉagrene estas al mi, amiko! Vi ĉion scios, dum mi ĉi tie nenion ekscios. Nu, adiaŭ, iru...

Jakobo eliris, malleviĝis de la perono, ĝentile dufoje riverencis al la gardistoj, diris por ajna okazo, ke morgaŭ, kiam li portos al la princo tagmanĝon, li kunprenos ne vodkon, sed rumon, kaj ekiris hejmen.

La tavernisto, oĉjo Grejs, estis dormetanta en sia fotelo. Malferminte unu okulon, li demandis:

— Sed eble vi, knabo, ankoraŭ ŝanĝos vian decidon kaj restos?

Jakobo ne respondis.

— Se vi restos, mi vin prenos. Sed pro la sama pago...

— Se vi pagus pli...

— Sendanka kreitaĵo...

Silente kunmetis Jakobo en kofreton subvestojn, paron de ĉiutaga vesto, varman kamizolon, ŝuojn sur lignaj plandumoj kaj, surmetinte sian festan ruĝan kaftanon, malleviĝis kun la kofreto subaksele laŭ la knarantaj ŝtupoj. Li havis ankoraŭ multajn aferojn hodiaŭ.

Antaŭ ĉio en la feraĵa bazaro li aĉetis tri malgrandajn fajlilojn, ses matrosajn tranĉilojn kaj dekduon da hispanaj stiletoj. En kvieta loko, ĉe la maro, li dense kunligis ĉiujn siajn aĉetaĵojn per ŝnureto, garde alligis al la armiloj anticipe preparitan leteron kaj envolvis ĉion kune en ĉifonon. Poste,

kunpreninte kelkajn botelojn da rumo, Jakobo ekiris al la galera albordiĝejo kaj demandis holandanon-superrigardanton, ĉu ŝipestro Ahlström estas sur la ŝipo.

Ahlström estis sur la ŝipo.

Jakobo leviĝis laŭ la ŝtuparo, laŭte salutis ferdekestron Sigge-n kaj kriis al li, kvazaŭ al surdulo:

— Nun ankaŭ mi estas maristo, *herre* Sigge. Mi ne plu estas servisto en taverno.

Sigge akceptis tiun novaĵon indiferente, sed iuj el la remistoj levis la kapojn. Jakobo ekiris pluen, al la ŝipestra kajuto. Sur lia vojo — de malsupre, de la benkoj, kie estis alkatenitaj la bagnuloj, — leviĝis mano kun malfermita polmo, kaj al Jakobo ĝuste en tiu momento malbukiĝis la buko sur la ŝuo. Li kliniĝis kaj ekiris pluen jam sen la volvaĵo — nur kun la kofreto.

Ŝipestro Ahlström dankis pro la rumo kaj siaflanke eldiris deziron helpi al la junulo sur lia nova vojo.

— Mi konas la ekonomon de la eskadro, — diris li, — la ekonomo bezonas spertan helpanton de admirala bufedisto.

Kaj Ahlström skribis por Jakobo, kiu kvazaŭ forgesis pri la ŝuldo de la ŝipestro al la tavernisto, letereton al la ekonomo de la eskadro.

— Nun ni renkontiĝos en la maro! — diris Jakobo, adiaŭante.

— Bedaŭrinde, ni hodiaŭ foriras al Revalo! — diris la ŝipestro. — Ni havas malsamajn vojojn...

La rekomendoj de Ahlström kaj de leŭtenanto Olof Brems taŭgis, kaj en la sama tago Jakobo jam estis listigita kiel

helpanto de admirala bufedisto sur la flagŝipo «Krono». Nun li estis preskaŭ certa, ke la reĝaj agentoj perdis lian spuron. Ĉu malmultaj homoj kun nomo Jakobo servas en la reĝa floto, kaj la familinomon li elpensis por si. Tuj li iros en la maron!

— Nu, ja vi havas orajn manojn! — diris la bufedisto, vidante, kiel Jakobo preparas vazaron por matenmanĝo de la subadmiralo. — Vi konas tiun ĉi aferon. Sed mi estis supera ĉerpisto en iu barona domo, tamen ĉerpisto nur portas vinon, kiel vi scias, dum ĉi tie necesas primeti la tablon kaj zorgi ankaŭ pri tio, ke al la subadmiralo plaĉu la manĝo. Kaj al li hodiaŭ venis el Upsalo la juna edzino; ĉu vi povas imagi — tiu olda diablo edziĝis al junulino. Do jen ŝi dancigas lin laŭ sia fajfilo... Estis eĉ tia onidiro, ke ŝi iros kun ni al la balenĉasado...

— Ĉu virino — al balenĉasado? — miris Jakobo.

— Virino! — mokimitis lin la admirala bufedisto. — Sed kia virino! Tamen, vi mem vidos, kio ŝi estas — sinjorino Gyllenstierna.

Jakobo ekvidis ŝin, kiam estis enportanta arĝentajn telerojn en la admiralajn ĉambrojn. Tuta rozkolora, kun grandega harnodo sub la nuko, la edzino de la subadmiralo sidis sur la admirala tablo, kovrita per verda drapo, kaj, alte tenante en la nuda mano vinbergrapolon, gajis, rigardante, kiel grafo Erik Gyllenstierna saltas, kiel hundeto, kiun oni incitas per bongusta osteto.

— For! — kriis la subadmiralo, turniĝinte al la knaro de la pordo.

— Ne, li eniru ĉi tien! — diris sinjorino Gyllenstierna. —

Mi deziras koni ĉiujn sur mia ŝipo. Ĉu vi estas servisto?

Jakobo riverencis.

— Ĉu vi penos, ke al mi estu oportune kaj gaje dum la vojaĝo? Ĉu vi komplezos min?

Jakobo riverencis ree.

— Tre bone! — laŭdis sinjorino Gyllenstierna. — Sed via admiralo diras, ke ĉi tie ĉiuj estas malĝentilaj, krudaj kaj koleraj, kiel diabloj. Li ankoraŭ diras, ke virino sur ŝipo alportas malfeliĉon en batalo. Sed pri kia batalo povas temi, se vi iras ĉasi balenojn. Kaj mi neniam vidis, kiel oni ĉasas ilin...

— Iru! — ordonis Gyllenstierna, alpaŝante al Jakobo.

— Kaj la matenmanĝo estu bongusta! — kriis post li sinjorino Gyllenstierna.

Fermante la pordon, li aŭdis, kiel la sinjorino estis diranta al la subadmiralo:

— Aĥ, vi ŝajne paŭtas, mia minaca edzo? Eble, vi deziras pendumi min, kiel vi pendumas viajn matrosojn? Aŭ puni per knuto?

En la bufedo Jakobo diris:

— Mi dum multaj jaroj laboradis en tavernoj kaj vidis tiajn knabinojn plurfoje. Sed ke tiela komandas admiralon — tio estas mirinda.

La admirala bufedisto ekridis.

— Ĉu filinon de grafo Piper vi nomas taverna knabino?..

— Ĉu ŝi estas filino de grafo Piper?

— Kaj eĉ sola.

Vespere en la admirala kajuto estis gaje: du leŭtenantoj kaj la ekonomo de la eskadro estis akompanantaj sinjorinon Gyllenstierna-n per violonoj kaj liuto. En la plene malfermitajn fenestrojn fluis muziko kaj nova kortuŝa kanteto, skribita de amiko de la reĝo — poeto Holmström — okaze de morto de la reĝa hundo — Pompe.

Pompe, fidela servisto de l' reĝo,
Dormadis ĉiunokte en ties lito,
Finfine, laca pro jaroj kaj eventoj
Li mortis ĉe ties piedoj...

Matrosoj sur la pobferdeko, artileriistoj sur la kanonferdeko, soldatoj sur galerioj interpalpebrumadis, aŭskultis la belan, delikatan voĉon de la edzino de la subadmiralo.

Multaj ĉarmaj knabinoj
Volus vivi kiel Pompe,
Multaj herooj strebus
Feliĉi morti kiel Pompe...

En la admirala kajuto oni ekaplaŭdis, kriis «brave»; la matrosoj, sidante sur ŝnuregaj volvaĵoj, ekridaĉis.

— Lerte dirite, — prononcis unu. — Morti, kiel hundo ĉe la piedoj de la reĝo, — jen kio, evidente, al mi mankas...

— Ja tio estas por herooj! — diris alia. — Kaj vi, fraĉjo, estas nur Ŝvabrilo.

Malsupre ekfajfis fajfilo, ekkantis klariono.

— O ho! — diris Ŝvabrilo. — Similas, ke ni devos labori.

La klariono ekkantis duan fojon. Aliris leŭtenanto kun vipo, kriis, svinginte ĝin:

— Ĉu vi ĉi tie surdiĝis?

La ferdekestro estis krianta etende:

— En lini-i-on!

Al la flagŝipo estis alligiĝantaj malgrandaj ŝipoj, ŝarĝitaj per kestoj da pulvo, kuglegoj en vergaj korboj, rezervaj kanonaj afustoj. Artileriistoj estis tirantaj grandajn veltolajn manikojn de la pulvejo al la prua luko — la pulva rezervo povus eksplodiĝi pro hazarda fajrero. Sur la meza ferdeko ekbatis tamburo — sub minaco de morto estingi ĉiujn fajrojn sur la ŝipo. En la ŝipkuirejo la deĵoranto pri meĉo surverŝis la fajrujon. Ĉe la ŝipa fajrilo, ĉiam brulanta meze de tino kun akvo, ekstaris gardistoj kun mallongaj lancoj. Matrosoj estis haste elbatantaj el la pipoj cindron. La vaĉanta leŭtenanto batadis al la dentoj ĉiujn, kiuj devigis lin longe atendi...

Ĉe la ŝtuparo en la pulvejon oni trifoje batis al sonorilo. Ŝvabrilo, eltirante ŝnuron de takelo, minacis:

— Nu, *herre* balenreĝo, gardu vin! Ricevos vi, kompatinda...

5. Sinjorino Gyllenstierna

Senvestiĝante, Margret demandis la edzon:

— Kaj kiel oni vin intencis radumi? Ĉu tio estis tre timige? Vi neniam rakontis pri tio al mi...

La subadmiralo respondis per malĝoja voĉo:

— Dio scias, kio venas en vian kapon...

— Ĉu vi multe verŝis da kristana sango, kiam vi estis pirato?

— ree demandis sinjorino Gyllenstierna.

Li levis la okulojn supren, kvazaŭ petante defendon de Dio.

— Ĉu multe?

Kaj ŝi oscedis:

— Mi neniam pensis, ke okazas tia enuo...

— Mi ne havas tempon por enui, karulino, — prononcis grafo Gyllenstierna. — Mi havas multajn aferojn...

— Jes, vi ĉiuj havas ŝtatajn aferojn...

Ŝi demetis la ŝuojn kaj tiris sin:

— Vi, certe, rimarkas nenion, vi estas maljuna, por vi ĉio ĉi ne estas interesa. Sed mi tiel enuas, mi simple ne povas vivi. Ĉiutage la reĝo subskribas ukazojn pli kaj pli stultajn. Kial, ekzemple, nupto ne povas daŭri pli ol du tagojn? Kial nobelo ne rajtas gastigi pli ol dek du personojn samtempe? Kial estas malpermesite aranĝi balojn, artfajraĵojn, belajn ĉasadojn kun ĉasistoj? Kial?

La grafo respondis firme:

— Tial, ke mono necesas por milito, sed via nobelaro pretas ĵeti al la vento la tutan oron de la lando...

Li, ĝemante, detiris de la kalva kapo la perukon kun harligo, surmetis ĝin sur formilon, zorge glatigis kaj metis sur la kalvaĵon tolan noktoĉapon kun kvasto.

— La reĝo mem ja ĉion rajtas! — daŭrigis Margret, ĵetinte al la edzo oblikvan, rapidan, abomenantan rigardon. — Mi ja bone memoras, kiel la tuta Stokholmo renversiĝadis pro liaj petoloj, kiam li kun siaj junaj rabistoj sabradis sur stratoj ŝafojn

kaj kurĉasadis kun luphundoj honestajn homojn...

— Tio estis juneco, — maĉinte per la lipoj, diris la subadmiralo. — Nun lia reĝa moŝto estas serioza kaj plena de plej grandaj planoj. Eŭropo apartenos al Svedio, vi povas esti tute certa pri tio...

— Ĉu vere?

— Vere, karulino...

Li surmetis brokaĵan ĥalaton kaj tralavis la buŝon per aroma akvo.

— La reĝo estas saĝa kaj modesta, — diris Gyllenstierna. — Kaj modesteco estas la plej granda virto...

— Li manĝas simplan soldatan manĝon! — ekridis Margret. — Dio, kiel al mi tedis tiuj stultaj rakontoj. Vi, grafo, eble forgesis, ke mi estas ne vilaĝa knabino, sed naskita grafino Piper kaj ion komprenas de la infanaĝo. La modestaj gustoj de Karolo kostas por Svedio ne malpli, ol la lukso de Ludoviko por la francoj... Tiel diras mia patro, kaj li scias sufiĉe... Portu al mi piron!

La grafo alportis pladon kun fruktoj, sed sinjorino Gyllenstierna subite ekdeziris fromaĝon. Gyllenstierna ree foriris. Ŝi kuŝiĝis en la liton, malligis la harplektaĵojn, rigardis al si en speguleton, faris grimaceton al si. Estis aŭdeble, kiel la subadmiralo postulas de la bufedisto fromaĝon. Sur la pobferdeko oni ekkuris, pulioj ekknaris, la bufedisto sur la admirala velboato ekiris por fromaĝo en Stokholmon. La subadmiralo, ĝemante, kuŝiĝis apud la edzino. Ŝi odoris je vino. La grafo fermis la okulojn, li deziris dormi. Li sciis: se li nun ne ekdormos — komenciĝos sendormeco. Sinjorino

Gyllenstierna kliniĝis super li, abrupte deŝiris lian noktoĉapon, plaŭdfrapis la kalvaĵon:

— Via kapo, kiel ĉe bebo, estas en lanugo... Ĉu vi estis blondulo aŭ brunharulo? Rakontu, se tion ne eblas vidi... Devas ja mi scii...

— Apenaŭ tio gravas nun! — respondis la subadmiralo serioze kaj malgaje.

Ŝi ĵetis al li maltrankvilan rigardon, ŝajnigis, ke ekdormas. Gyllenstierna strabis al ŝi kaj ekvidis, ke ŝi per blankaj fingroj fingrumas la harligon kaj ŝia granda buŝo kolere ridetas.

Post kelkaj minutoj Margret singarde leviĝis de la lito, surmetis varman, kun molanasa lanugo, ĥalaton, kovritan per arĝenta brokaĵo, surĵetis sur la ŝultrojn maldikan toledan ŝalon kaj, malferminte la pordon, eliris sur la galerion de la admirala kajuto.

En la haveno, kvazaŭ lampiroj, navedis ŝarĝaj ŝipoj, kantis klarionoj, sonoris sonoriloj. Sur boatoj oni estis veturigantaj al la ŝipoj ebriajn soldatojn, tiuj per la krudaj gorĝoj kriegis maldecajn kantojn. Malproksime en nokta nebulo apenaŭ briletadis fajroj de Stokholmo.

Sinjorino Gyllenstierna per piedbato vekis dormantan en ĉambreto nigrahaŭtan knabinon-sklavinon, donacitan al ŝi de la patro, kaj ordonis porti sur la galerion botelon da maljuna Bordoza vino kaj fromaĝon. La knabino tuj aperis kun pleto. Tiam al ŝi estis ordonite tuj voki ĉi tien *herre* kolonelon Jameson. Tiu venis anhelante, timigita, ne kompreninte, ke lin postulis al si ne la admiralo, sed sinjorino Gyllenstierna.

— *Herre* kolonelo, — diris Margret, — vi longe estis en

Arĥangelsko kaj ĉion konas tie...

— Ho jes, mi tute ĝuis ĝin! — diris James, trankviliĝante kaj gajiĝante ĉe vido de bona vino, kristalvitraj pokaloj kaj la bela edzino de la subadmiralo. — Mi konas Arĥangelskon...

— Do mi ĝuste deziras paroli kun vi pri tiu urbo...

La kolonelo riverencis.

— Vi devas rakonti al mi pri eksterlandanoj, kiuj loĝis tie. Moskvianoj min ne interesas.

James komencis paroli. Li scipovis rakonti per velureca voĉo, farante elegantajn gestojn per la dekstra mano. Rakontante, li estis ĝentile ridetanta. Sed malgraŭ ĉiuj penoj de James, Margret aŭskultis lin malatente. Ŝin tute ne interesis kaj mono de konsulo Martus, kaj elokventeco de pastro Fritsch, kaj komercaj ruzaĵoj de loĝantaj en Arĥangelsko eksterlandaj negocistoj.

— Ĉu estas tie almenaŭ bona kuracisto? — demandis ŝi subite, alportinte al la buŝo pecon de fromaĝo.

La kolonelo ĵetis rapidan rigardon al Margret kaj rememoris kelkajn onidirojn pri la sekreta agento de la reĝo en Arĥangelsko. Poste li respondis gravmiene:

— En mia tempo tie estis kiel kuracisto iu Des-Fonteines, Lars — tiel li nomiĝis. Lars Des-Fonteines...

— Rakontu al mi pri li ĉion, kion vi scias...

— Sed mi scias tre malmulte! — kontraŭdiris la kolonelo.

— Min interesos eĉ tio...

Ŝi verŝis vinon en la pokalojn. Kaj, silentinte iom, diris:

— Li nun ree estas en Arĥangelsko. Ni estis amikoj en la delikataj jaroj de infaneco, sed tre, tre delonge ne intervidiĝis. Rakontu...

6. Al ekiro!

Matene la ŝipestroj raportis al la eskadrestro pri tio, ke enŝipigo de trupoj estas finita bonorde. Specialaj okazintaĵoj ne estis. Nur sur ŝipo «Justa kolero» ŝiriĝis ŝnureskalo, kaj kvar ebriaj soldatoj dronis.

La subadmiralo balancis la kapon.

Post la raportoj la subadmiralo deklaris ordonon pri transpostenigo de ŝipestroj. Urquhart, kiel la plej sperta ŝipestro, konanta la Blankan maron, estis nomumita komandi «Kronon». Golgolsen estis direktita sur «Koleran urson». Leŭtenanto Olof Brems iris kiel ŝipestro sur «Justa kolero», jaĥton «Aroma floro» la eskadrestro konfidis al leŭtenanto Johan Morat. Sur aliaj ŝipoj de la eskadro ĉio restis kiel antaŭe.

— Kie mi devas havi konstantan restadejon? — demandis kolonelo James.

— Sur «Krono», — respondis la subadmiralo. — Por vi estas disponigita ejo, konforma al via militista rango.

La kolonelo riverencis.

— Ĉu eblas forpermesi homojn sur la bordon? — demandis Golgolsen.

— Ne, — respondis la subadmiralo.

— Ĉu baldaŭ ni levos la velojn? — demandis leŭtenanto Olof Brems.

— Vi levos ilin, kiam ricevos de mi ordonon! — severe respondis la subadmiralo.

Olof Brems ruĝiĝis makule.

Por matenmanĝo sur «Kronon» venis la ŝtata sekretario kaj patro de sinjorino Gyllenstierna grafo Piper, ĵus veninta el Pollando de la glora armeo de reĝo Karolo. Lia reĝa moŝto ordonis al Piper devigi «tiujn ŝtipkapulojn el la ŝtata konsilio», ke por la milito la mono estu donata senrifuze. En la konsilio troviĝis neniu kuraĝulo, kiu aŭdacus kontraŭdiri al la ŝtata sekretario, kaj Piper estis en tre bona humoro.

Ili matenmanĝis triope — sinjorino Gyllenstierna, la subadmiralo kaj grafo Piper.

— Mi liveris al vi ordonon de la reĝo! — diris Piper ĉe deserto. — Vi malfermos la koverton survoje al Moskvio, post vizito de la ŝipoj al urbo Kopenhago...

Kaj li etendis al Gyllenstierna koverton kun kvin reĝaj sigeloj.

— Ĉu io nova? — demandis la subadmiralo.

— Kiom mi scias, ne. Simple ceremonio de ekposedo de urbo Arĥangelsko kaj favoroj de la reĝo al la matrosoj kaj oficiroj de la eskadro...

Gyllenstierna kaŝis la koverton en feran skatoleton, turnis ŝlosilon en la seruro kaj ree malleviĝis en sian fotelon.

— Ĉu per vortoj lia reĝa moŝto nenion ordonis transdoni?

— Lia moŝto siro nia reĝo estas malkontenta, — respondis grafo Piper. — Tre malkontenta. Vi tro longe prepariĝas...

— Ĉu tro longe? Rememorigu al lia moŝto nia reĝo, grafo,

ke mi dum multaj jaroj estris niajn agentojn en Moskvio kaj scias pri ĝi pli, ol... — li stumblis, — ol multaj aliaj. Ili pensu, ke ni vere iras ĉasi balenojn...

— Neniu knabo en la reĝlando kredis al tiu fabelo! — ridetante, respondis Piper. — Kaj vi vane disputas, mia amiko! Lia moŝto siro nia reĝo tre akre esprimiĝis pri la daŭro de la preparado de la ekspedicio...

— Kiel — akre?

— Mi ne dezirus aflikti vin, mia amiko...

— Sed mi devas scii la opinion de mia reĝo pri mi, grafo!

Piper suspiris:

— Kiel vi deziras: lia reĝa moŝto esprimiĝis en tiu senco, ke tia maljuna kaj obstina azeno, kiel vi...

— Maljuna kaj obstina azeno?

— Jes, *herre* subadmiralo. Kaj ankoraŭ lia moŝto siro nia reĝo bonvolis diri, ke eĉ piratoj en maljuneco iĝas tro singardemaj...

— Ĉu tio estas ĉio?

— Jes... — malcerte diris Piper. — Tamen, estis ankoraŭ dirite pri tio, ke vin eblas anstataŭigi...

La subadmiralo silentis. Piper verŝis por li vinon. Li deŝovis de si la kalikon kaj prononcis, retenante furiozon:

— Bone, grafo, mi levos la ankron jam hodiaŭ.

— Se ĉio estas preparita, tiam vi vere devas levi la ankron senprokraste. Mi diras al vi pri tio kiel via sincera amiko. Lia reĝa moŝto estas konvinkita pri sukceso de la ekspedicio, des

pli, ke sur ŝipoj de negocistoj en Arĥangelsko estas viaj homoj, ĉu tiel?

Gyllenstierna diris, ke vere estas.

Forakompaninte grafon Piper-on, grafo subadmiralo vokis barbiron kaj ordonis meti al si hirudojn, por purigi la vejnojn de malbona sango. Poste, ripozinte kaj trinkinte vinon kun akvo, li ordonis levi signalon: «Eskadro estu plene preta al ekiro!»

— Sed vi malbone aspektas! — ekkriis sinjorino Gyllenstierna.

— Por miaj jaroj mi aspektas bonege! — kontraŭdiris la subadmiralo.

Post signalo «Ŝipanaroj drinku la reĝan glaseton kaj tagmanĝu» leviĝis flago, signifanta «Atenton». Kaj tuj la subadmiralo ordonis sendi al la eskadro: «Ankrojn levu, sekvu min!»

De la bordo deiris remŝipoj, por elirigi la ŝipojn el la haveno.

— Komencu! — ordonis la subadmiralo.

Nudpiedaj matrosoj ekiris sur la ferdeko, premis kapstanajn stangojn, la ĉefa ferdekestro kun skurĝo ekkuris apud la matrosoj. La subadmiralo ordonis iri alvente per maldekstra halso. La ŝipo estis malrapide turniĝanta. Vento plenigis la frontan topvelon, ekludis en la ĉefa kaj poba topveloj. La pastro de la eskadro pie prononcis malantaŭ la ŝultro de grafo Gyllenstierna:

— Sankta Brigita protektu nin!

— Amen! — respondis la subadmiralo.

Sur la pobo tamburistoj batis sur sep tamburoj: «Militiro por gloro de la reĝo!»

— Jen al vi balenoj! — diris la matroso, alnomata Ŝvabrilo, al alia matroso, longa kaj kolera Kristofero. — Ĉu vi aŭdas, kion batas la tamburistoj?

— Kaj por mi estas fekegale, kion ajn ili batu! — respondis Kristofero.

— Ili batas «Militiron por gloro de la reĝo!», — diris Ŝvabrilo, ŝovante sub la vangon pecon de maĉtabako. — Ni iras en Moskvion.

— Moskvianoj estas riĉaj! — diris Kristofero. — Tempas ankaŭ por ni riĉiĝi iomete.

Kolonelo James kaj sinjorino Gyllenstierna staris sur la pobkastelo. James, en peruko, en trikorna ĉapelo, kun muŝo ĉe la buŝo, estis volviĝanta en nigra drapa mantelo, diranta galante:

— Mi estos feliĉa, sinjorino Margret, se en urbo Arĥangelsko mi trovos almenaŭ ion, kio kaŭzos rideton de la tiom belaj lipoj...

— Sed ĉu ni tamen iras al Arĥangelsko? — moke demandis Margret.

— Ni, sinjorino, iras mortigi balenojn...

Matrosoj sur la pruferdeko per egalmezuraj voĉoj estis kantantaj malnovan, teruran piratan kanton:

Drinki kaj manojn ne lavi, fifallerala,
Tuj drinki, ĉar ni ne forlavos...

Fifallerala-lerala,
Ni sangon ne povos forlavi...

— Mi, ŝajne, konas tiun ĉi kanton, — diris sinjorino Gyllenstierna. — Sendube konas. Mi nur ne aŭdis antaŭe ties vortojn.

— Tre kruda kanto! — rimarkis James. — Por vi, eble, ne indas eĉ koni ĝin, sinjorino Gyllenstierna...

Ŝi stamfis:

— Silentu!

Akceptu do gastojn, megero!
Vi nin ne atendis en via taverno,
Do verŝu vi ion por ni!
Ĉu vi kion verŝi, ne scias?
Pli ruĝan ol ni ĉiam verŝi kutimas!
Verŝu!
Fifallerala-lerala!
La-la!..

— Nun mi komprenis! — diris sinjorino Gyllenstierna. — Tiun kanton fajfas mia edzo. Jes, jes, kiam li havas bonan humoron, li nepre fajfetas tiun kanton. Tiel tire, kvazaŭ vento hurlas en maro...

7. En urbo Kopenhago

Antaŭ sunsubiro sabate la eskadro de subadmiralo Gyllenstierna ĵetis ankrojn en Christianshavn — la haveno de la dana ĉefurbo Kopenhago. Matrosoj kaj soldatoj, amasiĝintaj ĉe la ŝipflankoj, kun deziregо rigardis al la riĉa urbo, pitoreske etendiĝinta sub vesperaj sunradioj. Rufa Bill Hartwood

rakontis:

— Mi havis honoron partopreni bombardadon de ĉi tiu urbo en la tago, kiam la unuigita eskadro decidis ekstermi la danojn. La liniaj ŝipoj staris ĝuste malantaŭ tiu kabo. Mi servis tiam kiel kanonisto sur centkanona «Hoko». Indus vidi, kio ĉi tie okazadis...

La matrosoj suspiradis: se ili povus promeni ĉi tie! La danoj, verŝajne, humiliĝis post kiam oni devigis ilin eliri el la alianco kun Rusio kaj Polio. Nun ja ili komprenis, kiu estas la vera mastro de ilia lando.

— Sed tamen ni ne finbatis ilin! — diris ferdekestro Okke, alnomata Lepora Nazo pro tio, ke li ĉiam movadis la nazon, kvazaŭ flarante. — Ni ilin ne finbatis! Antaŭ kvindek jaroj ni forte batis ilin, sed same ne ĝisfine. La sveda flago super la urbo — jen kion ni bezonas. Ĉu vi vidas la urbodomon? Ĝuste tie devas esti la sveda flago...

Sur la pruferdeko de la flagŝipo pafis la antaŭa kanono.

— La oldulo vokas la havenestron! — diris Svante Bagge — la ŝipa ekzekutisto. — Nun estos amuzo!

Dano — la estro de la haveno, alta homo en blua kaftano kaj blankaj ŝtrumpoj, — sur sia boato aliris kun ĝentila vizito al la flanko de «Krono». La parada ŝtuparo ne estis mallevita. La matrosoj vidis, kiel paliĝis la dana oficiro, kiam oni proponis al li leviĝi laŭ ŝnureskalo antaŭ la okuloj de la rideganta ŝipanaro. Nek la subadmiralo, nek ŝipestro Urquhart parolis kun la dano. La konversacio estis komisiita nur al ĉefa ferdekestro del Robles.

La ferdekestro akceptis la oficiron stare, kontraŭ reguloj de

ĝentileco ne interesiĝis pri sano de la dana reĝo kaj ne diris, por kio venis la eskadro. La dano estis silente mordanta la lipojn.

— Pro malfacileco de la ekspedicio grafo subadmiralo decidis ellasi parton de la ŝipanaro sur la bordon! — diris del Robles. — Mi esperas, la urbo afable akceptos la maristojn, venintajn sub la gloraj flagoj de la floto de lia moŝto reĝo de Svedio Karolo la Dekdua, daŭrigu la Sinjoro liajn tagojn...

Del Robles eksilentis, atendante, ke la dano diru «amen». Sed la dano diris nenion. Li staris, metinte la manon sur la tenilon de sia spado, fiera, larĝŝultra, alta. Per unu bato de la pugno li povus faligi la ferdekestron de la piedoj.

— Ĉu la urbo renkontos la matrosojn kaj soldatojn de lia reĝa moŝto kiel fratojn? — diris del Robles. — La magistrato ne avaros pri regalo, ĉu?

— La urbo kaj la magistrato ne estas parencoj de matrosoj de la floto de lia reĝa moŝto Karolo la Dekdua! — respondis la havenestro. — Kio koncernas manĝon, do la danoj de antikveco al neniu rifuzis regalon.

Post kelkaj minutoj la oficiro riverencis, petinte tempon por preparo de la urbo por renkonto de la «amikoj».

— Kiom da horoj vi bezonas por tio? — demandis del Robles.

— Ne pli ol du horojn ekde tiu sekundo, kiam mia boato atingos la bordon.

Del Robles konsentis. La havenestro malleviĝis laŭ ŝnureskalo en sian boaton. La ŝipanaro akompanis lin per ridego, fajfado kaj ululado.

La suno jam delonge subiris, kiam sur la ŝipoj ekbatis tamburoj, informante matrosojn kaj soldatojn pri tio, ke ili povas iri sur la bordon. La homoj kiel pizoj ekŝutiĝis en ŝipboatojn. Super la senventiĝinta maro ektondris matrosaj kantoj, en lumo de plena luno la boatoj unu post alia aliradis la silentan bordon, kaj ĉi tie la gajon tuj anstataŭadis perpleksaj ekkrioj:

— Kio estas tio? Ĉu kavalerio?

— Ja ili estas kun muskedoj...

— Pro kia diablo?

Sur la kajo senmove staris rajdantoj kun sabroj, mallongaj lancoj kaj muskedoj. Luna lumo brilis sur la ŝtalaj kirasoj.

— Por kio ci staras ĉi tie? — demandis Birge Kornusa Kruro senmovan rajdanton.

— Iru laŭ via vojo! — respondis li per tia voĉo, ke Birge ne plu deziris demandi.

Sur ponto Knippelsbro, kiu estis liganta la urbon kun la haveno, staris surpiedaj soldatoj, apogante sin sur lancoj. Bill Hartwood provis ŝerci kun unu, sed la soldato insultis lin, kaj la anglo perdis deziron gaji.

— Kie ili prenis tiom da militistaro? — demandis Murdis Amikon de Svante Bagge — la ŝipa ekzekutisto. — Al la tuta Danio estas permesite havi ses mil soldatojn, sed ĉi tie estas ne malpli ol mil!

Leŭtenanto Brems, devancante la matrosojn, aŭdis la demandon de Murdis Amikon kaj kolere respondis:

— Ĉi tie ne estas soldatoj, tio estas urbanoj. Ili deziras, ke vi

kondutu pli kviete, jen ĉio. Kvankam tio estas malgaja, nenion eblas fari. Gajo hodiaŭ ne estos, mi tiel supozas. Kaj estus bone, se mi erarus!

La urbo kvazaŭ formortis. Kiam la svedaj maristoj eniris en la urban pordegon, neniu fenestro lumis. Pordoj de domoj estis ŝlositaj, sur tavernoj kaj ĉardoj pendis seruroj, ĉe malfermitaj butikoj pasumadis gardistoj kun raŭke bojantaj hundoj sur rimenoj.

La supera artileriisto de «Krono» ĉefleŭtenanto Plomgren demandis rajdanton, kiu ŝajnis al li oficiro:

— Kion ĉio ĉi signifas? Kial estas tiom da soldatoj? Ĉu ni ne estas amikaj regnoj?

La rajdanto respondis:

— Iraĉu for, antaŭ ol mi surveturis vin per mia ĉevalo, malpura rabisto!

Plomgren kaptis la spadon. Tuj el fera pordego, kiu antaŭ tio ŝajnis fermita, elveturis ankoraŭ rajdantoj. Iliaj ĉevaloj ronkis, retenataj per mordaĵoj, la armaĵoj brilis en lumo de la ruliĝanta en nuboj luno. Plomgren kun siaj oficiroj staris meze de la pavimo. Ili estis nur kvar kontraŭ la grandnombra dana gardistaro.

— Iru kien vi iris! — diris la rajdanto. — Iru kaj parolu inter vi. Sur la placo de la Urbodomo vin atendas drinkaĵo kaj regalo. Iru! Kion vi bezonas de ni? Ĉu amikan ĝentilecon? Nia memoro estas ne tiom mallonga, kiel al vi ŝajnas. Ni ĉion memoras. Kaj niaj infanoj same ĉion memoros! Iru, antaŭ ol ĉi tie verŝiĝis sango!..

Sur la placo de la Urbodomo estis brulantaj peĉaj torĉoj kaj

staris grandegaj tabloj kun rostita viando, legomoj en lardo kaj blanka pano. Kvardeksitelaj bareloj kun biero kaj deksitelaj kun vino estis disstarigitaj apud la fontano. Ĉe la pordoj de la urbodomo staris gardistoj kun halebardoj kaj pistoloj. Kaj ĉirkaŭ la placo senmove rigidiĝis ne malpli ol cent rajdantoj, kies parto estis hele prilumita de la luno, kaj alia parto kaŝita en ombro.

— Kiu do regalos nin? — laŭte kriis Bill Hartwood. — Kie estas la mastroj de la festeno?

— Regalu vin mem! — sonore respondis rajdanto, kies ĉevalo estis prancanta ĉe la magistratejo. — Regalu vin mem, kaj Dio absolvu viajn pekojn!

La oficiroj, ofendiĝinte, foriris al sia ŝipo. Kaj la matrosoj kaj soldatoj komencis drinki kaj manĝi. La vodko estis bona kaj la manĝaĵo same — grasa kaj abunda. La oficiroj meze de la vojo ĉesis intenci ofendiĝi kaj revenis. Da manĝo kaj drinkaĵo estis ĝissate. Murdis Amikon kaj Okke Lepora Nazo, ebriiĝinte, ŝoviĝis en la basenon sub la fontano por naĝi. Birge Kornusa Kruro iris al la rajdantoj — paroli kun ili por ĝojigi la animon.

— Kiu vi estas? — demandis li junulon, kiu estis dormetanta en selo.

La dana junulo levis la kapon, oscedis, respondis trankvile:

— Mi estas forĝisto.

— Ĉu simpla forĝisto?

— Jes, simpla forĝisto.

— Kaj vi havas propran ĉevalon?

— Ne, tio estas ĉevalo de mia amiko — ĉaristo.

— Kaj la lanco? Kies estas via lanco?

— La lancon forĝis mi mem, per mia martelo, sur mia amboso.

— Drinku kun mi, knabo! — petis Birge. — Kvankam vi estas dano, sed mi havas nenion kontraŭ vi.

— Mi ne drinkos kun vi! — respondis la junulo. — Kiam venos por mi tempo drinki, mi trovos amikojn. Iru al la viaj kaj drinku kun ili. Deziru unu al la alia bonorde forporti viajn kapojn el tie, kien vi intencas iri!

— Kaj kien ni intencas iri? — demandis ebria Birge.

— Ja tion vi scias mem!

Birge foriris ŝanceliĝante. La luno leviĝadis ĉiam pli alte. La matrosoj roris kanton:

Rekrutigistoj trovis lin,
Kaj en la reĝan floton varbis lin,
Rekrutigistoj lin al servo prenas,
Kaj ŝipoj lin al morto trenas...

La kanto tondris sur la placo de la Urbodomo. Jakobo fiksaŭskultis — negaja kanto. Li estis iranta laŭ strateto. Lin neniu haltigis eĉ unufoje pro tio, ke li estis en ruĝa kaftano, ne simila al la bluaj uniformoj de maristoj kaj la verdaj uniformoj de soldatoj. La rajdantoj rigardis al li kiel al loĝanto de Kopenhago. Unu avertis ŝerce:

— Iru vi, fraĉjo, hejmen, alie vi trafos en svedajn manegojn kaj oni detiros de vi vian dandan kaftanon. Kaj la amatino atendos ĝis morgaŭ...

Jakobo respondis per rido.

Sur la urbodomo la horloĝo batis la dekunuan, kiam per krudfera pordofrapilo li frapis al malalta kverka pordo de la rusa ambasadejo. Al li oni malfermis ne tuj: en la pordo knaris giĉeto, ies okuloj suspekteme pririgardis Jakobon.

— Kiun vi bezonas?

— Sinjoron Izmajlov-on.

— Sinjoro ambasadoro ne akceptas en tiuj horoj.

— Mia nomo estas Jakobo el Stokholmo. Transdonu al sinjoro ambasadoro, ke lin demandas Jakobo el Stokholmo...

La gardisto foriris por nelonge. Poste la malalta pordo malfermiĝis. Servisto kun kandelingo en la mano kondukis Jakobon en grandan malvarman halon. Sur tablo estis brulantaj kandeloj, vekiĝinta en sia kaĝo germana kanario estis mallaŭte kvivitanta. Jakobo staris senmove. Lia vizaĝo estis arda, la koro ofte batis.

La rusa ambasadoro Andreo Petroviĉ Izmajlov eliris al li per rapidaj paŝoj, metis la malgrandan fortikan manon sur la ŝultron, ekparolis gaje:

— Ĉu vi estas viva? Mi ĝojas, tre ĝojas! Mi ne esperis vidi vin viva... Montriĝu, kia vi estas? Vi estas ankoraŭ juna, mi pensis — vi estas pli aĝa. Vi agis racie — ne kiel junulo, sed kiel saĝa viro... Mi diris pri vi en Moskvo al la Siro. Estis ordonite diri al vi dankon pro la servo...

— Mi ne por tio! — konfuzite diris Jakobo.

— Mi scias, ke ne por tio, tamen la cara bona vorto helpos poste trovi direkton de la vivo. Eksidu!

Jakobo eksidis. Izmajlov sonigis arĝentan sonorileton, ordonis al servisto doni vespermanĝon, bruligi ankoraŭ kandelojn. Nun Jakobo ekvidis, ke Izmajlov ne estas juna — li aĝis pli ol kvardek jarojn, havis malfermitan, malhelan vizaĝon, rapidan rigardon, nigrajn sagajn lipharojn super la diklipa buŝo.

— Kio pri Ĥilkov?

La servisto primetis la tablon, enportis vinon, pladojn kun manĝo. Jakobo rakontadis. Izmajlov atente aŭskultadis, en liaj okuloj lumis viva intereso. Iam li kolere grakadis, iam insultadis. Kiam Jakobo finis sian malgajan rakonton pri Ĥilkov, Izmajlov suspiris:

— Aĥ, kia malfeliĉo. Nu, kiel helpi al li? Ja li estas juna, tute juna, sed vi jen diras: li grizhariĝis! Necesas pensi, pensi, eble, ni ion elpensos. Plu rakontu! Tamen, atendu, jen kion mi diros: grandan servon faris vi al via patrujo...

Jakobo ruĝiĝis, sed rigardis al la ambasadoro rekte, kvankam timis, ke larmoj aperos sur la okuloj.

— Grandan servon. Da viaj ĉifritaj leteroj mi mem ricevis pli ol dek, via ŝlosilo por ili estas bona, per tiu ŝlosilo mi la leterojn malfermadis, transsendadis en Moskvon — al la Siro, tra Polio kaj per aliaj vojoj. Viaj leteroj, kiuj iris de vi el Stokholmo, ĉiuj sian lokon atingis tra urbo Uleaborgo. Mortadis niaj kaptitoj, sed sian aferon faradis. En sango estas multaj leteroj, sed liveritaj nepre. Gloron, grandan gloron al la pereintoj!

La ambasadoro silentis iom, enpensiĝinte.

— En katenoj, de teruraj suferoj turmentataj, ne forgesadis

la ĵuron la fidelaj bonaj homoj. Ĉu scias vi iliajn nomojn?

— Ne! — diris Jakobo. — Eĉ unu nomon mi ne scias, krom tiu, al kiu ekzekutisto forhakis la kapon en kastelo Gripsholm.

— Ŝĉerbatij, mi aŭdis. Ĉu oni torturis lin?

— Torturis forte.

— Ĉu li konis vin, sciis, kiu vi estas?

— Li sciis bone. Li estis la unua el la rusaj kaptitoj, kiun mi ekvidis. Mi pri li rakontis al sinjoro Ĥilkov, al kiu mi jam tiam portadis tagmanĝojn el la taverno. Sinjoro Ĥilkov sufloris al ni multajn necesajn ideojn — kiel kion fari por plia utilo, kaj monon ne avaris, kvankam li mem estas ne tro riĉa. Al li mi ŝuldas ankaŭ tion, ke multon el la antaŭlonge pasintaj tempoj de la rusia historio mi eksciis...

— Ĉu vi sciis, ke vi riskas la vivon? — interrompis Izmajlov.

— Mi komprenis tion.

— Sed Rusion vi neniam vidis?

— Ne vidis, sinjoro. Tamen multon pri ĝi mi eksciis de Andreo Jakovleviĉ Ĥilkov kaj de Ŝĉerbatij. La vortojn de miaj forpasintaj gepatroj, diritajn al mi en Kolivano, mi bone memoris: ĉiujn fortojn apliki por reveni en Rusion.

— Nun vi iras kun la eskadro?

— Kun la eskadro. Oni prenis min kiel helpanton de admirala bufedisto. En Stokholmo mi estas suspektata, resti plu mi ne povis...

La servisto lerte ŝanĝis sur la tablo la tablotukon, verŝis

medon en kalikojn.

— Kio estas tiu trinkaĵo? — demandis Jakobo.

— Ĉu vi ne scias? — ridetis Izmajlov. — Tio estas medo. Bona malnova rusa trinkaĵo. Ĉu bona?

— Bona...

La okuloj de Izmajlov rigardis ruze:

— Kiam vi revenos en Rusion, estu singarda kun ĉi trinkaĵo. Al multaj ĝi malligadis langojn, multaj pro manko de kutimo tro vigle babiladis pri tio, kio ne plaĉas en la propra hejmo; pro tio okazadis malfeliĉoj...

Subite li demandis:

— Kion do Ŝĉerbatij rakontis al vi pri Rusujo?

Jakobo ĵetis al la ambasadoro sian obstinan rigardon, silentis iom, kvazaŭ pensante, poste respondis kun racia singardeco:

— Ĉie estas siamaniere bone kaj siamaniere malbone, sinjoro, sed ne estis por mi pli malbona vivo, ol ĉi tie. Mi rezonas tiel: homo estas naskita al la mondo ne vane, li devas ion fari. Sentas mi en mia animo strebon al afero, sed kia do afero mia estas ĉi tie? Ĉu estas destinite al mi de la sorto nur komplezadi la taverniston kaj donadi en la kelo bieron kaj vodkon al diboĉantaj matrosoj?

Izmajlov aŭskultis atente. La servisto forigis la pladojn kun manĝaĵo, donis ledan sakon kun tabako, erikajn kaj argilajn pipojn. La ambasadoro, oportune retrokliniĝinte en la fotelo, bruligante la pipon, diris:

— Tio estas prava, kvankam iom nebula. Nun ni parolos pri la afero, la filozofion ni lasu por libera tempo. Rakontu al mi

kun detaloj, kia estas via admiralo, kiaj estas oficiroj, ĉu multaj estas soldatoj por surpieda batalo, por ŝipatakoj, por kanonoj... Necesas senprokraste pri ĉio skribi, mi jam morgaŭ sendos kurieron en Libavon, el tie al la poloj, tiuj liveros al la niaj.

Jakobo diris ĉion, kion sciis. Aŭskultante, Izmajlov kapjesadis:

— Brave, brave! Vi havas akran okulon, saĝulo, bone....

Trans la fermitaj, kurtenitaj fenestroj ekklakis hufoj de ĉevaloj, aŭdiĝis tintado de armiloj, rido. Izmajlov klarigis:

— La gardistaro forrajdas — do, la svedoj foriris sur la ŝipojn. La tuta urbo hodiaŭ leviĝis, forte ili malamas siajn venkintojn, dum duonjarcento ili batalis kuraĝe kontraŭ ili, sed, vidu, nun estas malvenko. Kiam vi estos en Rusio — diru: multaj danoj nun diris malfermite — prefere dronu la damnitaj svedoj en Moskvio kun siaj ŝipoj...

— Sed nur unu eskadro sveda venkon ne determinos! — diris Jakobo.

— Ne! Ne determinos, sed inspiros la niajn al tio, kio sekvos, — necesas kompreni! Ĝis la nuna tago ni la svedon ne venkadis. Se la eskadro ĉe Arĥangelsko estos frakasita — estos por la svedoj la unua mara malvenko. Kaj de kiu? De la rusianoj, kiujn ili opinias nur piediraj soldatoj, kaj eble ankoraŭ surĉevalaj, sed tute ne maristoj. Tamen la rusianoj estas marvojaĝantoj naturaj, tion mi kaj multaj aliaj tute ĝuste scias. Arkivisto ĉi-tiea, tre respektinda homo, granda filozofo kaj proksima mia kompano, antaŭ nelonge faris por mi kopion de letero de Frederiko, skribitan de la dana reĝo en marto de la jaro 1576, tio estas antaŭ pli ol cent jaroj, al iu Ludoviko

Munk. Ĉi Munk estis sciiganta la reĝon danan pri tio, ke rusa rudristo el Malmuso konas vojon al Gronlando kaj al Grumanto... Kaj jen kion la reĝo skribas al Munk...

Izmajlov leviĝis, malŝlosis seruron en malgranda, jugland-ligna skatoleto, elprenis kvaroble falditan folion, legis en la dana, ellasante la nenecesan:

— «Al Ludoviko Munk pri unu ruso, kiu vizitas Gronlandon. Eksciis ni el via mesaĝo, ke en la pasinta somero kelkaj Trondhejmaj civitanoj eniris en Vardo en rilatojn kun unu rusa rudristo Paŭlo, loĝanta en Malmuso kaj...»

La ambasadoro levis la fingron, legis kun speciala esprimo:

— «...ordinare, ĉiujare ĉirkaŭ la Bartolomea tago, naviganta al Gronlando. La rudristo Paŭlo sciigis ilin, ke se por lia laboro oni donos ioman rekompencon, li, eble, rakontos al ili informojn pri tiu lando kaj kondukos iliajn ŝipojn...»

Li faldis la paperon, demandis:

— Ĉu vi komprenas, kion tio signifas? La reĝo dana en tre malnovaj tempoj turnas sin al siaj civitanoj, ke tiuj sub gvido de rusa rudristo helpu al li savi siajn homojn, katenitajn de glacioj en Gronlando. Jen kion tio ĉi signifas.

Izmajlov ŝlosis la paperon en la skatoleto, ree eksidis en la fotelon, diris laŭte:

— Rusaj pomoroj estas mastroj kaj en maro kaj en oceano. En la sama tempo, kiam multaj germanaj, anglaj kaj aliaj sciencistoj kun gloro por si publikigas stultegajn traktatojn, en kiuj montras tute ne ekzistantajn en la polusaj landoj duonhomojn kun unusola okulo, — niaj pomoroj delonge vintras sur Grumanto, sur la Ursa insulo, sur Kolgujevo kaj

Vajĉago, al Mangazeo iradas...

La horloĝo batis la duan. La ambasadoro subridis:

— Jen, parolis mi al vi kiom longe, — mankas konversaciantoj ĉi tie, pro pensoj iam la kapo ŝvelas. Aŭskultu atente: se vi trafos viva en Arĥangelskon — serĉu kapitan-komodoron Ievlev-on. Tio estas bona mia amiko, ni multajn landojn kune traveturis, ĉio estis — kaj bona kaj malbona. Li vin konas laŭ miaj al li leteroj. Morgaŭ mi akompanos vian eskadron. Estas ĉi tie tia loko, ke videblas ĉiu ŝipo, iranta tra Sundo. Mi akompanos kaj kurieron sendos al Silvestro Petroviĉ — ke la eskadro trairis la markolon, prepariĝu al inda akcepto...

Jakobo, ridetante, rigardis al Izmajlov rekte en la okulojn.

— Kaj al vi — ankoraŭ dankon! — diris la ambasadoro. — Jakobo... Kia estis nomo de via patro?

— Teodoro.

— Do, Jakobo Teodoroviĉ. Kaj ne ofendiĝu, ke Rusujo per kanona pafado vin renkontos. Komprenu tiun bruon kiel saluton al via nobleco kaj kuraĝo. Ni adiaŭu en la rusa maniero. Eble, vi eĉ ne scias, kiel ĝi estas farata, fremdiĝis?

Ili brakumiĝis, kisiĝis trifoje. En la grizaj okuloj de Jakobo brilis larmoj. Izmajlov ŝajnigis, ke ne vidas ilin, diris zorgeme:

— Malbone estas por vi post ĉiuj sur la ŝipon veni... Jen kio... vi estas tie kiel helpanto de bufedisto. Montru, fraĉjo, divenemon, portu al la admirala ino kvazaŭ donacon.

Li sulkigis la frunton, pensante, poste ekridis:

— Kaviaron vi portos. Ili, svedoj, ĝin tre ŝatas, kaj vi

kvazaŭ kaviaron serĉis por plezuro de sia sinjorino. Ĉio do iros glate... Kaj ĝis la haveno vin mia Steĉjo kondukos — lin ĉi tie ĉiuj konas, vi iros tra kvietaj stratoj. Pri li ne timu: tre fidinda homo!

La admirala bufedisto sur «Krono» aĥis, ekvidinte bastan korbon kun nigra kaviaro. Aĥis matene ankaŭ sinjorino Gyllenstierna.

— Vidu! — diris ŝi al la subadmiralo dum matenmanĝo. — Ĉu vi vidas, kiel ĉiuj ĉi tie penas ĝojigi min? Kaj vi plu intencas sendi min hejmen, en tiun enuan Upsalon!

Grafo Gyllenstierna ne respondis. Li estis skribanta memorandon — leteron al la reĝa ambasadoro en Kopenhago rilate de la hieraŭa malhonorado. La sveda ambasadoro en Danio sidis samloke, en profunda fotelo, balancadis la piedon, vestitan per danda ŝuo kun banto, ludadis kun tenilhavaj okulvitroj. Kolonelo James manĝis la rusan kaviaron per arĝenta kulereto, diris langvore:

— Mi havis malfeliĉon hieraŭ traveturi en kaleŝo la urbon — vere, tio estas neeltenebla! Kvazaŭ en malamika ŝtato. Armitaj rajdantoj, armitaj piedirantoj, ŝlositaj domoj! Kiel vi tion toleras?

La ambasadoro levis la ŝultrojn:

— Ni devas, *herre* kolonelo! Ekde kiam lia reĝa moŝto frakasis ilin trairinte kun la floto la orientan brakon de Sundo — Flintreden, ili ne eltenas la svedan flagon... Bedaŭrinde, la memorando al nenio helpos. Unu bona venko super la moskvianoj valoras pli ol multaj memorandoj.

8. Por gloro de la reĝo!

Post signalo «Ŝipanaroj drinku la reĝan glaseton kaj tagmanĝu» sekvis dua signalo «Ŝipestroj tuj venu al grafo subadmiralo».

Gyllenstierna akceptis la oficirojn stare kaj al neniu proponis eksidi. Antaŭ li sur vila drapo de la tablo kuŝis koverto kun ok vaksaj sigeloj. Ĉirkaŭrigardinte ĉiujn kunvenintojn per siaj kafkoloraj, nebonkoraj pupiloj, Gyllenstierna prononcis:

— Nia Siro, daŭrigu la Sinjoro liajn tagojn, ordonis al mi kunvenigi vin kaj legi al vi lian reĝan ordonon. Ĝis eliro en la maron neniu el la matrosoj devas scii pri ĝi ion ajn, kaj nur kiam ni forlasos la havenon, tiu ĉi ordono povas esti deklarita al la maristoj de la krona floto. Ĉu vi komprenis min?

La ŝipestroj zumis, ke ili komprenis.

Gyllenstierna per du manoj prenis la koverton, rompis vice la sigelojn, elprenis paperfolion kaj laŭtlegis per firma, malmilda voĉo:

— «Al vi, miaj oficiroj kaj matrosoj, mi donacas urbon Arĥangelskon kun ties Komerca korto, kun ties Komercaj ĉambroj, kun ties tenejoj kaj magazenoj, kun ties temploj kaj kapeloj, kun domoj personaj kaj ŝtataj, kun domoj de pastroj kaj eminentuloj por plena disrabo por daŭro de tri tagnoktoj...»

Li silentis ekzakte tiom da tempo, kiom al li necesis por vidi la impreson, kiun faris la reĝa donaco al la oficiroj, kaj eklegis plu:

— «Al vi, miaj oficiroj kaj matrosoj, mi ordonas ĉiujn rusajn ŝipajn majstrojn, same kiel dungitajn de la rusoj

alilandajn ŝipajn majstrojn kaj submajstrojn, kune kun tiuj, kiuj almenaŭ per io kontribuas al frato mia caro Petro en konstruado de planita de li floto, — kapti...»

Gyllenstierna por momento paŭzis:

— «...kapti kaj submeti al mortpuno per pendumo sur placoj de urbo Arĥangelsko, por ke en estonteco neniu faru tion, kio de la Providenco estas destinita por la regno sveda...»

— Ĉiujn pendumi? — per raŭka baso demandis Golgolsen.

— Ĉiujn pendumi! — per glata voĉo ripetis la subadmiralo.

Kaj, tusinte, li eklegis plu:

— «Ĉiujn ŝipojn rusajn finkonstruitajn mi ordonas peli al mia ĉefurbo, en urbon Stokholmon. Ĉiujn ŝipojn nefinkonstruitajn mi ordonas submeti al fajro. Post kio al subadmiralo mia grafo Gyllenstierna mi ordonas bruligi urbon Arĥangelskon de kvar flankoj kaj ne forlasi la incendiejon, ĝis de la menciita urbo restos nur solaj braĝoj, por ke per tiu ĉi nia ago por eterne senigi fraton mian caron Petron je loko, kie povus li konstrui kaj ekipi ŝipojn por mara kaj oceana irado».

Kaj, levinte la voĉon, la subadmiralo legis la daton kaj la lokon de la subskribo de la ordono fare de la reĝo, poste ankoraŭ foje kisis la paperon kaj ordonis al la ŝipestroj direkti sin al siaj ŝipoj.

La ŝipestroj estis disirantaj silente. Ĉe la ŝtuparo Golgolsen diris nelaŭte:

— Ne facila afero al ni estas komisiita...

Al li neniu respondis.

Tuj kiam la ŝipestroj forlasis «Kronon», Gyllenstierna

ordonis levi la ankrojn. Estis kviete, varme, facila vento alportis el la urbo sonoriladon. Urquhart ridetis per la dika vizaĝo, liaj malgrandaj okuletoj kvazaŭ dronis en la grasaj vangoj, li diris per dolĉa voĉo:

— La danoj preĝas pri ni!

— Ili dankas Dion pro tio, ke ni foriras en la maron, — respondis kolonelo James. — Kovarda lando. Kaj rimarku, *herre* ŝipestro, kiel ĉio estis aranĝita: kiam du niaj matrosoj interbatiĝis kaj elprenis tranĉilojn, la danoj mem ligis ilin kaj mem kondukis en la eskadron. Ĉu vi scias, pro kio estas tia komplezemo? Tial, ke se pereus nia matroso, ni povus supozi, ke tion faris la danoj, ĉu ne? Kaj tiam ili devus respondi!

— Estas bedaŭrinde, ke saman ordonon, kiel pri Arĥangelsko, ni hodiaŭ ne aŭdis pri Kopenhago. Ilin ĉiujn necesas fini...

En krepusko la ordono de la reĝo, transskribita de skribisto de la subadmiralo por ĉiu ŝipestro, estis legata sur ĉiuj ŝipoj. La matrosoj furioze kriadis gloron al la reĝo de la svedoj, vandaloj kaj gotoj. La ŝipoj iris kolumne. Matene, ĉirkaŭirinte la kabon de Skagen, ili boardis, ĝis kiam konstanta vento de Atlantiko plenigis la velojn. Iĝis malvarme. Vaĉantoj kaŝe, por varmiĝi, drinkis vodkon, rezervitan jam en Stokholmo, subvaĉantoj ludis ĵetkubojn kaj kantis malnovan kanton pri *herre* Sjöter, kiu demandis sian patrinon, per kia morto al li estas destinite morti. La patrino respondis:

Mi diros la sorton de vi kun sincer',
Ho filo, mi scias ja ĝin!
Ne timu batalon sur seka vi ter',
Vin mare renkontos la fin'!

La matrosoj kantis per raŭkaj gorĝoj, ĵetadis kubojn, insultadis, sed la kanto iĝadis ĉiam pli laŭta, ĝin sciis ĉiuj sur la ŝipo kaj ĉie kunkantis: kaj en la meza ferdeko, kaj en la orlopo, kaj sur la kanonferdeko, kaj en la ŝipkuirejo, kaj sur la ĉefa ferdeko. Jen jam *herre* Sjöter konstruis ŝipon kaj foriris en la maron. Komenciĝis tempesto. Peke vivis *herre* Sjöter, kaj li ne deziras morti:

La ŝip' balanciĝis, ektremis la kil',
Kaj Sjöter en sia kajut'
Ĵetkubojn, lotlibron en plena trankvil'
Elmetis al tabl' en minut'.
Nun lasta, amikoj, alvenas la hor',
Mi vivis en peko, kaj vi!
Okazu do nun nia lasta esplor'
Ni trovu plej pekan el ni!

Herre Sjöter ĵetas lotkubon, ĝi almontras lin. Per hurlantaj voĉoj la matrosoj kantis:

Li ekis tuj penti al la kompanar'
Pri pekoj faritaj de li:
Pri hont' fianĉina, por edzoj misfar'
En temploj kun sakrilegi'...
Ne timis li juĝon, rabante sur voj',
Atakis en nokt' kaj vesper',
Tranĉadis senkulpajn li homojn kun ĝoj',
Enfosis vivantojn en ter'...

La matrosoj kantis; subleŭtenanto Klas, sub sonoj de la kanto, en antaŭvespera krepusko, en sala oceana vento estis rakontanta pri riĉaĵoj de la moskvianoj. Dungitoj aŭskultis avide, iliaj pupiloj lumis tiel, kvazaŭ por ili sufiĉis nur etendi la

manon, por kapti perlojn, ĉervoncojn, grandkostan brokaĵon, felojn de zibeloj kaj arĝentaj vulpoj. Ankaŭ pri la rusaj virinoj rakontis la ĉioscia Klas. Laŭ la vortoj de la subleŭtenanto rezultis, ke la rusaj belulinoj estas belstaturaj, kun alta brusto, ruĝvangaj, cedemaj...

Moskvio ŝajnis proksima. Ankoraŭ kelkaj tagoj da oceana vojo — kaj la eskadro estos ĉe la celo.

Tiam tamburistoj ekbatos sur la mezferdeko «forpermeson», kaj matrosoj en kirasoj, kun tranĉiloj ĉe la koksoj deiros en Arĥangelskon. Sonoriloj de rusaj preĝejoj sonoros, salutante la novan mastron de la tuta Nordo — reĝon Karolon XII kaj liajn kuraĝajn militistojn. Rusaj bojaroj, morte timigitaj de la floto de lia reĝa moŝto, en brokaĵaj peltmanteloj kaj altaj ĉapoj falos antaŭ la konkerintoj sur la genuojn. Kaj la matrosoj ekiros per fieraj paŝoj sur stratoj de la por ĉiam subigita urbo kaj elektados por si pli riĉajn domojn — por rabado kaj amorado...

Ne timis li juĝon, rabante sur voj',
Atakis en nokt' kaj vesper',
Tranĉadis senkulpajn li homojn kun ĝoj',
Enfosis vivantojn en ter'...

Ĉe la prua kanono, rigardante antaŭen al ŝaŭmaj maraj ondegoj, staris, enpensiĝinte, Jakobo. La bufedisto aliris lin de malantaŭe, frapis al la ŝultro, demandis:

— Kio, knabo? Ĉu vi pripensas la ordonon de lia reĝa moŝto? Ĉu vi estas kontenta? Certe! Al vi fortunis, ege fortunis. Vi riĉiĝos jam en la unua ekspedicio. Ĉu vi aŭdis, kion tiuj rabistoj rakontas pri Arĥangelsko? Ja ili scias la aferon. En Arĥangelsko ni ĉiuj ion akiros...

— Jes, ni akiros! — sen ajna esprimo ripetis Jakobo.

Li rigardis antaŭe, en senliman, egale bruantan vaston de la oceano. Nemalproksime la ŝipa ekzekutisto Svante Bagge, enplektante en trivostan skurĝon kuglojn, kantis per melankolia tenoro:

Ho, se Di-sinjor' korfavorus al ni,
Kaj lasus reveni al hejm':
Mi templon konstruus el ŝtono kun pi',
Kaj plumbe ĝin kovrus mi mem...

La pastro de la eskadro surgenue estis preĝanta en sia kajuto, kies duonon okupis kanona trunko. Balbutante psalmon, la maljunulo sulkiĝadis, la rabista kanto malhelpis al li konversacii kun Dio.

Mi templon konstruus el ŝtono kun pi',
Kaj plumbe ĝin kovrus mi mem...

Sinjorino Gyllenstierna aŭskultis la kanton, reveme rigardante al la ŝaŭma, griz-blanka oceano. Kolonelo James, akompanante promenantan sur la ŝipo sinjorinon Margret-on, pensis pri tio, kiel li postulos al si blankan ĉevalon, por ke sur ĝi enveturi en fumantan pro incendioj, nigran pro fulgo, disetendiĝintan antaŭ la venkintoj urbon Arĥangelskon.

La eskadro iris sub ĉiuj veloj, la svedaj flagoj flirtis sur mastoj, vento fajfis en rigilaro, salaj oceanaj ŝprucoj flugadis sur la ferdekon.

Fore, malproksime brileris kaj malaperis fajroj de Stavanger.

La matrosoj kantis la lastan strofon de la kanto:

Kaj kiam aŭdiĝis de li lasta vort',
Lin kovris malluma inund',
La ŝip' kun la mastoj ekkrakis kun fort'
Kaj dronis al nigra profund'...

Parto tria
Invado

Venu gasti, Karlo sveda,
Mian domon por plezur', —
   Havas multajn, Karlo sveda,
   Mi regalojn sen mezur':
Jen pirog' al vi sen krem',
En Tulo bakis mi ĝin mem,
   En Tulo bakis mi ĝin mem,
   Farĉis per papava sem';
Estas da biskotoj cent,
Nur vi gardu pri la dent',
   Se vi denton ne konservos,
   Tuj vi tiam do pereos, —
Tuj vi tiam do pereos, —
Landon vian ne revenos!

Soldata kanto

Ĉapitro unua

Mi vidas per okul' racia:
Kolumbo en glaci' Rusia
Rapidas spite al fatal'.

Lomonosov

Amikoj liaj de labor',
De venkoj kaj de gloro tondra...

Rilejev

1. Mistera barko

En la skansoj ĉe la Dvina buŝo oni starigis novan gardoturon, kaj por ke de la maro ĝi ne estu videbla — oni hakis pinon kaj alligis ĝian fortikan trunkon per ŝnuregoj al la ĉevronoj. La gardistan budon oni same kaŝis en longbranĉaj piceoj, lignofajron — por kuiri kaĉon — estis ordonite bruligi en kavo, je duonversto for de la gardistoj, por ke latronoj el la maro ne divenu, ke la bordo observas ilin atente kaj senripoze, tage kaj nokte.

Por helpo al la doganistoj la pafista estro Simono Borisoviĉ ordonis sendi dragonojn sub komando de leŭtenanto Meĥonoŝin. Sur la gardoturo kvarfoje dum tagnokto ŝanĝiĝadis gardistoj, laŭlonge de la bordo sur ŝlimaj marĉetoj, sur flava ŝutiĝema sablo, sur putrintaj algoj tage kaj nokte rajdadis dragonoj kun duonmuskedoj, alligitaj per rimenoj al la seloj.

Kiam sur la riveran buŝon faladis nebuloj kaj la mara foro iĝadis nepenetrebla por okulo, dogansoldatoj eliradis patroli sur velboatoj. Signalisto tenadis sur la genuoj ŝargitan signalan

fusilon, la soldatoj atente fiksaŭskultadis plaŭdadon de ondoj, maltrankvilajn, laŭtajn kriojn de mevoj.

Ĉiuj maraj gardantaroj estis sub komando de kapitano Krikov. Li mem ofte venadis jen al la skansoj, jen al la dragonoj, jen en malgrandajn gardistajn budojn, disĵetitajn sur la bordo, kaj se li ne povis forlasi la urbon, tiam li sendadis anstataŭ si Jegorĉjon Pustovojtov-on, kiu estis servanto severa, postulema kaj justa...

En la skansoj, nemalproksime de la gardista budo, oni ĉarpentis malgrandan kabanon, la platan tegmenton kovris per tero kun musko, la konstruaĵon mem kaŝis per piceoj. Ĉi tie aŭ Atanazio Petroviĉ, aŭ Jegoro pridemandadis fiŝistojn, kiuj, malgraŭ la cara ukazo, tamen iradis en la maron por nutri sin. Ĉi tie al la malobeantoj estis farata severa riproĉo, por ke ili ne plu iru en la maron spite al la ukazo, sed Atanazio Petroviĉ firme ordonis neniun konduki en la arestejon al la kolera diablo dumaano Larionov, al kancelarianoj Gusev kaj Molokojedov, klariginte sian ordonon tiel:

— Ĉi majstroj de torturoj nun en sangego ĝis genuoj iras. La vojevodo pro timo entute la racion perdis, malicas malkonforme al sia titolo. Kaj sub bastonoj kaj sur pendigilo homo sin pri io ajn kalumnios. Ne nur nomos sin sveda militisto, sed eĉ aliajn kompatindulojn sub ŝtatan knuton kondukos. Ne, fraĉjoj, se necesos, mi ankaŭ ĉi tie rompantojn de la cara ukazo punos en mia maniero. Kaj neceson pri ekzekutisto mi ne vidas: fiŝistoj, maraj laborantoj, iras kun fiŝo, mi ĉi tie ĉiun konas laŭnome, kaj se iun ne konas, tiu sidos ĉe ni en la kabano kun seka manĝo, ĝis mi ekscios, kiu li estas, de kiu patro filo, ĉu bona homo. Kial do lin, laboranton, en la

manegojn de Larionov fordoni?

La kancelarianoj denuncis pri la arbitreco de kapitano Krikov al la dumaano. Tiu pro tia memvoleco koleriĝis, ordonis al Molokojedov rajdi al la skansoj, minaci al la kapitano en la nomo de la princo severe per kruelaj punoj pro kaŝado de malamikoj.

Molokojedov grimpis sur falvan ĉevaleton, ekrajdis trote en akompano de deko da pafistoj, sed en la skansoj, ekvidinte la severan kapitanon, timidiĝis kaj riverencis pli malalte, ol devis. Atanazio Petroviĉ elaŭskultis la ukazon de la vojevodo silente, diris, ke ĉion ĉi li scias, ke al latronoj li ne helpas, kaj se li iun liberigas, do tiujn, kiujn li bone konas. Ĉe la interparolo ĉeestis leŭtenanto Meĥonoŝin, kiu frapetadis la boton per vergo, oscedetadis. Kiam la kancelariano kun sia akompanantaro foriris, Meĥonoŝin leviĝis de arbostumpo, tiris sin kaj diris:

— Vi, sinjoro kapitano, agu kiel vi deziras, sed mi latronojn, kiujn miaj knaboj kaptos, mem pelos al la arestejo. Al ajna kanajlaro kaj kampularo mi ne helpos. Tiele ni atingos, ke eĉ al la princo mem Aleksio Petroviĉ ni la vojon baros...

Atanazio Petroviĉ ne respondis.

En la sama tago dragonoj de Meĥonoŝin pelis en la urbon al la arestejo kvar fiŝistojn. Jegorĉjo penis defendi la marajn laborantojn, Meĥonoŝin respondis bruske. La fiŝista malnova velboato knaradis, balanciĝante ĉe la albordiĝejo de la skansoj, la dragonoj silente elĵetadis sur la bordon la fiŝon, kiun kaptis por sia nutrado la fiŝistoj. Leŭtenanto Meĥonoŝin kiel venkinto forveturis en vilaĝon ludi kun knabinoj, «fari plezuraĵojn kaj amoraĵojn», kiel li ŝatis esprimi.

En la sekva tago matene gardisto sur la nova turo ekvidis trimastan barkon kaj tuj batis alarmon. Mallongaj, ekscitantaj sonoj ekflugis super la kvieta maro, super la skansoj. La doganaj soldatoj kun muskedoj ekkuris al siaj lokoj. Sur la turon, transpaŝante tri ŝtupojn, leviĝis Jegorĉjo, rigardis en lornon, insultis:

— Kiam mi vin, diablojn buntajn, instruos la okularion viŝi?

Li mem viŝis per la basko de sia uniformo la vitron kaj rigardis ree; ekvidis, ke la barko sidas malalte — do, forte ŝarĝita; ke ĝi estas de fremda konstruo, — tiel en Blankmario oni ŝipojn ne faras; ke la ŝarĝo kuŝas ankaŭ sur la ferdeko kaj ke la homoj sur la ŝipo estas vestitaj ne kiel fiŝistoj, tro malvastajn vestaĵojn ili havas...

Krucosigninte sin, por forpeli malklarecon el la okuloj, Jegorĉjo donis la lornon al kaporalo — la estro super la skansoj. La kaporalo rigardis tre longe kaj konfirmis la timojn de Jegoro:

— Ne nia barko!

— Ja ankaŭ mi vidas — ne nia.

— Sed ankaŭ ne sveda! Ĉu sveda militisto iros kontraŭ ni per unu barko militi?

— Per unu ne iros! Sed la homoj ŝajne ne estas niaj. Preni ilin necesas, nenion eblas fari! Pafu per la arkebuzo, poste ni ekscios, kies ili estas...

La kaporalo ektrumpetis per klariono, la dogansoldatoj, trejnitaj de Atanazio Petroviĉ ĉion fari rapide, ektrenis la gardistan velboaton de malprofundaĵo al profundaĵo. Supren enkuris alta doganisto kun arkebuzo, apogis ĝin al sia flanko,

malfermis la buŝon, por ne surdiĝi, kaj pafis. La arkebuzo batis kvazaŭ kanono, la pafinto memkontente diris:

— Nu, kiel batas! Eĉ la turo ŝanceliĝis...

Jegorĉjo respondis severe:

— Ŝanceliĝis! Da pulvo necesas malpli ŝuti, kiomfoje pri tio estis dirite.

Al la signala pafo el siaj terkabanoj kaj la gardista budo ekkuris al siaj lokoj la dragonoj. La doganistoj, alte tenante la muskedojn, por ne malsekigi la pulvon, estis sidiĝantaj en la gardistan velboaton — atingi la latronan barkon. Sed atingi ili ne sukcesis. La barko en la buŝon ne iris, sed, uzinte la venton, lerte ŝanĝis la kurson kaj ekiris laŭlonge de la Vintra bordo al Mudjugo.

— Lerte ili turniĝas! — diris la kaporalo. — Videblas, ke estas bonaj maristoj.

— La barko estas ne nia, sed iras ili kiel ni, — respondis tiu doganisto, kiu pafis per la arkebuzo. — Je Dio, nia maniero...

Jegorĉjo suspiris:

— Ne atingos ni per la velboato. Perdis ni ilin, kaporalo.

Al la bordo sur malhelbruna ŝvita virĉevalo alrajdis Meĥonoŝin en rubandoj kaj puntoj, ordonis al siaj dragonoj urĝe postrajdi la ŝipon laŭlonge de la maro — elspuri, kien iras la latronoj. La dragonoj tuj ekgalopis laŭ la malseka apudbordo.

— Se ili atingos — sitelon da vodko! — diris Meĥonoŝin. — Se perdos — mi ilin vipos. Ili min konas...

Kaj ekiris en la domon — dormi post ebrio.

2. En la citadelo kaj en la urbo

Silvestro Petroviĉ revenis en la fortreson el fora vojaĝo — inspektado de fortikaĵoj — malfrue post noktomezo. Manjo eksidis sur la lito, etendis al la edzo la manojn, almetis la vizaĝon al la kruda drapo de lia Preobraĵenska kaftano. Li silente kisis ŝian kapon, kolon, varman orelon kun malgranda orelornamaĵo.

Apude en la ĉefĉambro kuiristino estis blovekscitanta fajron en la forno, por manĝigi la kapitan-komodoron. Frapante per la botoj, la servosoldato estis portanta brulŝtipojn, por hejti la banejon. Venjo kaj Irenjo vekiĝis, per dormaj voĉoj diris:

— Ĉu vi vidas, kiu venis? Paĉjo nia venis.

— Paĉjo venis...

En la diafana krepusko de la blanka nokto, sen kandeloj, Silvestro Petroviĉ avide manĝis fortan brasiksupon, bonguste maĉante porecan sekalan panpinton, rakontis:

— Vojevodo nia kion faris, Manjo, jen kapo! La petskribon pri tio, ke li ankoraŭ restu en la vojevodeco, li mem skribis, je Dio. Mem, kun siaj kancelarianoj. Al mi pri tio en vilaĝoj kaj fortikaĵoj homoj rakontis. Li kaptas fiŝiston, aŭ negociston faman, aŭ ĉasiston — kaj antaŭ si starigas. Tiu, kompreneble, tremas antaŭ li. Unue li persvadas — jen, diras, sklavo Dia, estas, diras, petskribo al la granda Siro pri mi, pri vojevodo, pri princo Prozorovskij, ke pro multaj miaj penoj oni petas lasi min en la vojevodeco por ankoraŭ unu servotempo — du jaroj. La Dia sklavo, nature, palpebrumas. Tiam eliras la monstro — torturisto Pozdjunin kun knuto, tiele svingas. La homo gratas sin, gratas, pensas, suspiras kaj metas sub la petskribo sian

sanktan nomon, kaj kiu ne scias skribi — krucon. Kun tio — restu sana. Do tiele ili sendis la petskribon, tiun, pri kiu al mi la bombardisto en Moskvo diris, per kiu riproĉis min...

— Ho Dio! — kunfrapis la manojn Manjo.

— Vere, ho Dio! Unu kampulo kun tiela malgaja rido rakontis: vi, diras, sinjoro kapitan-komodoro, vane miras. Por ni, diras, ĉio estas egala — kiu super ni kiel vojevodo sidas, kiu nin regas, kiu de ni sin nutras. Bonan homon ni neniam ĝisatendos, kaj kiu el la bestoj estas pli feroca — lupo aŭ urso, — mankas tempo esplori. Ni unu aferon scias: estu viaj vojevodoj trifoje malbenitaj. Riproĉis mi lin, la kampulon, por timigo, — ne taŭgas, mi diris, tiel pri vojevodo paroli, sed... Svingis mi la manon.

— Ĉu vi tiel lasos?

Silvestro Petroviĉ respondis ne tuj:

— Sed kion fari? Sub tiu petskribo, ŝajne, la tuta fremdula Komerca korto metis subskribon, kaj la angloj kaj aliaj kelkaj, kiuj ĉe mi sub aresto sidas. Malfacile estas al mi, Manjo. La bombardisto tiam en Moskvo koleriĝis...

Manjo subite maltrankviliĝis, leviĝis de la benko, ekkuris malkovri la skatolon:

— Aĥ, ve al mi, mi preskaŭ forgesis. Leteroj al vi el Moskvo, multaj leteroj. Kaj de Apraksin, kaj de Aleksandro Daniloviĉ...

Ne finmanĝinte la varman pladon, maĉante la panon, Silvestro Petroviĉ transsidiĝis al la fenestro, komencis legi la malgrandajn liniojn, skribitajn per la mano de Teodoro Matejeviĉ:

«...ankoraŭ Golicin el Vieno al la Siro raportas, ke la ĉefministro grafo Kaunitz eĉ paroli kun li ne deziras, kaj ankaŭ je neniu alia kalkuli eblas, ili nur ridas pri ni. Petas Golicin plore — per ajnaj rimedoj, laŭ li, necesas atingi super la malamiko venkon. Kvankam, li skribas, eternan pacon ni povas aranĝi, sed eternan honton per kio ripari? Nepre necesas por nia ŝtato almenaŭ malgranda venko, per kiu ties nomo plu en tuta Eŭropo gloriĝus. Sed nun pri armeoj niaj kaj pri nia armea regado ili nur ridas. Matvejev nia al Golicin skribis el Hago: «vivi ĉi tie por mi nun estas tre malfacile: amo ilia estas nur en komplimentoj al mi, sed en la afero ili estas tre malvarmaj. Turniĝas mi inter ili kiel fremdeca, kaj pro ilia ĉiama riproĉado ĉagreniĝas neelteneble».»

Manjo eksidis apud Silvestro Petroviĉ, ŝovis la manon sub lian kubuton, alpremiĝis al li. Li frotis la vangon al ŝia kapo, ne deŝiriĝante legis plu:

«...la turkoj, impertinentiĝinte, ĉe ĉiuj niaj malfeliĉoj kaj misfortunoj, malhoneste postulas, ke ni redonu al ili Azovon kaj nian floton bruligu en la Azova maro. Silvestro, Silvestro, tiujn ŝipojn bruligi, kiuj estis en tiaj penoj de ni konstruitaj, — nekristanoj damnitaj, eternaj niaj kontraŭuloj, kion ili deziras! Tolstoj nia inde al la ofendantoj respondis: «La ŝipojn, kiuj estas en la Azova distrikto, bruligi kaj la novkonstruitan fortikaĵon detrui, pri tio ne nur raporti, eĉ pensi pri raportado por mi ne eblas»...»

— Vi manĝus, Silveĉjo! — petis Manjo. — Malvarmiĝos la kokaĵa pirogo.

Silvestro Petroviĉ, ne aŭskultante, eksusuris per folioj de alia letero. Menŝikov estis transdonanta frazon de Petro

Aleksejeviĉ: «Kiam vortoj ne efikas pri paco, ĉi kanonoj per ĵetado de krudferaj pilkoj diros, ke pacon fari tempas». En la letero estis manifesto de la caro, en kiu Petro estis klariganta la sencon de la milito kontraŭ Svedio.

— Pri kio oni skribas? — mallaŭte demandis Manjo.

— Pri malgranda venko, — faldante la foliojn de la leteroj, respondis Ievlev. — Oni skribas, kiel bezonas ni almenaŭ malgrandan venkon super la svedo. Kvazaŭ mi mem tion ne scias...

Li balancis la kapon, ridetis, komencis finmanĝi la tagmanĝon. Manjo rakontadis per mallaŭta voĉo novaĵojn, li, rigardante al ŝi, pensis pri siaj aferoj. Poste li plenigis la pipon; trovinte momenton, eliris el la ĉambro, en nokta silento ĉirkaŭiris la fortreson, pririgardis, kio estis farita, dum li veturadis al la fortikaĵoj. Manjo jam estis kuŝanta, kiam li revenis.

— Kie vi estis? — demandis ŝi.

— Fumi tabakon iris! — respondis, ridetante, Silvestro Petroviĉ.

— Vi vian citadelon rigardis, — diris Manjo. — Mi vin konas. Rezen antaŭnelonge fanfaronis, ke multo estis farita: la kavalieron ĉe la bastiono oni finis kaj...

Silvestro Petroviĉ ekridis:

— Jen, kiajn vortojn vi eksciis: kavaliero, bastiono...

— Kun vi ĉiuj ne eblas ne ekscii, se nenio alia aŭdeblas: fusiloj, kaj muskedoj, kaj grenadoj, kaj ankoraŭ svedoj...

Li prenis ŝian manon en la sian, demandis flustre:

— Sed ĉu ne timas vi, Manjo? Nur veron diru, sincere?

Ŝi pensis iom, respondis trankvile, per serena voĉo:

— Kion do timi? Antaŭ nelonge estis ĉe mi Jegorĉjo, alveturigis tinon da peklitaj kukumoj, rezonis kun mi pri tio, kio kvazaŭ estis dirita de Petro Aleksejeviĉ pri bona militestro, eble, ankaŭ pri vi. Mi tiujn vortojn memorfiksis.

Manjo leviĝis sur la kubuto, deĵetis la harligojn, por ke ili ne malhelpu.

— Dirite estis tiel pri tiu oficiro: kuraĝo lia al la malamiko timidon kreas, arto lia igas homojn al li firme esperi...

Silvestro Petroviĉ rozkoloriĝis, mallevis la rigardon. Manjo plu rezonis:

— Same kaj Jegorĉjo, kaj Merkurov, kaj Krikov Atanazio Petroviĉ pri vi juĝas. Kial do mi timu? Mi vin pli bone ol ili konas, mi vidas, kiel vi pensas...

Glatiginte per la polmo lian frunton, ŝi aldonis:

— Jen ankaŭ nun vi pensas, jen kiaj faltetoj... Ne pensu, Silvestro Petroviĉ, ripozu, karulo...

Kaj interrompinte sin, ŝi ekparolis rapide:

— Taisja ĉe mi ĉi tie estis kun Ivaĉjo, dum du tagoj loĝis. Kaj tiel ŝi kun mi ploris, tiel dolĉe ploris; diris ŝi al mi: ne edziniĝos mi, Manjo, al Atanazio Petroviĉ, ne edziniĝos, kaj pensi pri tio al mi estas amare...

— Pri kio do vi ploris, stultaj?

— Ĝuste pri tio ploris, — pasis ŝia vivo, pasis bone; amas ŝi sian rudriston ĝis nun, kaj neniun alian ŝi plu amos. Pri tio ni

ploris.

— Sed vi ja mem pro kio ploris?

— Duope estas pli dolĉe plori, Silveĉjo. Mi ankoraŭ kiam fraŭlino estis, sola neniam ploris, sed kun amikino — ploris, ploregis...

Silvestro Petroviĉ laŭte ekridegis, ŝi tiris lin je la maniko, — vi la filinojn vekos! Li, ridetante, komencis malvesti sin.

Li dormis nelonge — ĉirkaŭ du horojn; leviĝis, dum Manjo ankoraŭ dormis, eliris vesti sin en la najbaran ĉambron. Tie jam estis fumanta pipon Rezen, atendis. Ili konversaciis rapide, per mallongaj frazoj; la inĝeniero akompanis la kapitan-komodoron ĝis lia velboato. Matrosoj en maristaj senmanikaj jakoj, en trikitaj ĉapoj, renkontis Ievlev-on gaje, per ŝercoj; per la tuta animo li subite eksentis — ili amas lin. Kiel, kiam tio fariĝis — li ne sciis; ankoraŭ antaŭ tiel nelonge oni ĵetis al li tranĉilon sur la perono de la Sepurba domo. Eble, tie oni ne sciis tion, kion scias la matrosoj? Eble, ne scias la laborantoj, kiom malmulte li dormas, kiel doloras liaj malvarmumintaj kruroj, kiom multe li devas fari, por sukcesi inde renkonti la svedan latronon?

— Vimplon! — ordonis la serĝento malantaŭ la dorso de Ievlev.

— Ekiris! — respondis alia voĉo.

La flageto — «Kapitan-komodoro estas ĉi tie!» — leviĝis sur la masto, ekflirtis forte en matena venteto. La tago estis varma, Dvino estis pigre plaŭdanta kontraŭ la konataj ĝis ĉiu betulo bordoj, en la animo subite iĝis tute trankvile, facile, pensoj ekiris klaraj, difinitaj, unu post alia: kio ankoraŭ ne

estas farita, kio estas farenda hodiaŭ, kio morgaŭ.

Malagrafinte la kaftanon, li demetis la trikornan ĉapelon, metis ĝin apud si, kun ĝuo komencis spiri bonan odoron de herboj, mallarĝigis la okulojn al malproksimaj arbaretoj, okulmezuris, kie sur la bordo — trans arbustoj, inter arboj — ankoraŭ meti kanonojn, kie li kaŝos kampulojn-ĉasistojn, kiuj sen celado ne mistrafos altinan moneron.

La velboato iris vigle, la matrosoj per junaj voĉoj kantis kanton, kiun Silvestro Petroviĉ ankoraŭ ne aŭdis. Li fiksaŭskultis:

Vagis tiam Jermako sur la maro blua,
Kaj disbatis Jermako ĉiujn ŝipojn velajn,
De tataroj, armenoj, kaj de nekristanoj,
Kaj eĉ pli ol tio — ŝipojn carajn mem!
Caraj ŝipoj ja sen distinga signo,
Sen la cara flago nekonataj iris...

— Kia kanto estas tio? — demandis Silvestro Petroviĉ, turniĝinte al la rudristo.

— Kiu scias! — respondis matroso Stepuŝkin. — Kantas ĝin, sinjoro kapitan-komodoro, sur la Marka insulo laborantoj, ĉiuvespere kantas. Kvazaŭ estis iu Jermako Timotejeviĉ, konkeris la kozako Siberion por Rusujo, — jen pri li la kanto estis verkita[110]...

La matrosoj kantis enpense, nehaste, plenbruste:

---

110 Jermako Timotejeviĉ (1532?–1585) — kozaka hetmano (ĝusta loko de deveno ne estas sciata, supozeble el Uralo, aŭ el Volgio, aŭ eĉ el Nordo ĉe Dvino), konkerinto de Siberio por la Rusa ŝtato ĉe Ivano la Terura. Tiu popola kanto reale ekzistas kaj estis registrita en diversaj variantoj en Uralo. En la teksto estas uzita nur ties fragmento *(trad.)*

Ekparolis tiam Jermak' — Timotea fil':
— Ho, mensogas vi, bojaro, hundo aĉa!
Sen demando kaj juĝo min pendumi volas!
Proda forto tiam en li ekflamiĝis do,
Proda sango tiam en li ekleviĝis do.
Li elprenis el ujo sian akran sabron,
Kaj forhakis al la bojaro l' ardan kapon,
De la ŝultroj defalis tiam l' arda kapo,
Kaj tra caraj ekruliĝis haloj-ĉambroj...

Ievlev kuntiris la brovojn, deziris frapi per la promenbastono, por ke ili ĉesu kanti pri tio, kiel estis forhakita la kapo de la bojaro, sed rememoris pri la vojevodo — princo Prozorovskij — kaj nenion diris. Pensis kun amaro: «Verŝajne ili multe pli pri li scias, ol mi. Pro tio ili ĝojas, ke ekruliĝis la bojara kapo». Kaj li rememoris subite la printempan nokton en Moskvo, caron Petron kaj liajn vortojn, plenajn de angoro: «Nubo de duboj!»

La matrosoj plu kantis, Silvestro Petroviĉ, kvazaŭ ne aŭdante, kunpremadis per la dentoj la buŝaĵon de la pipo, pensis, kion fari kun Prozorovskij, kun lia latrona petskribo. Kaj decidis firme: nun ĉi aferon ne komenci, — la svedo estas proksime, ne pri tio necesas maltrankviliĝi.

En la Sepurba domo li kunvenigis homojn — pafistan estron Simonon Borisoviĉ-on, Krikov-on, Merkurov-on, Semisadov-on, Ĥagajon Pustovojtov-on, ŝipajn majstrojn Ivanon Kononoviĉ-on, Koĉnev-on, okaze estintajn en la urbo ambaŭ Baĵenin-ojn: la pli aĝan — Jozefon kaj la humilan — Teodoron, pafistajn kaj dragonajn oficirojn, ŝipmajstrojn de Dono. La kancelarianoj same estis ĉi tie, sidis modeste sur la

benko, penis ne trafi al la okuloj de la kapitan-komodoro. Ievlev atendis silente, ĝis ĉiuj eksidos, frapetadis per la pipo la tablon, rigardis en la fenestron per malbonkora rigardo. Sur la kaviĝinta vango, ĵus razita de fortresa barbiro, estis moviĝanta makzelmuskolo.

— Ĉu la kanonoj el Moskvo estas ricevitaj? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Entute nombre dek kvar, sed kelkaj dum la vojo difektiĝis, — respondis Merkurov. — Ni riparas nun. La mortiroj kaj haŭbizoj estas en vojo...

Ievlev rigardis en la fenestron al blua Dvino.

— Kiu el fremdlandaj ŝipoj penis latrone foriri?

— Ilia eskortulo, «Obeo» nomata, — respondis Krikov.

— Kial ne foriris?

— Matrosoj de subleŭtenanto Pustovojtov eliris transverse.

— Ĉu estis brue?

— Ses senkuglajn pafojn ni faris! — diris de sia loko Ĥagajo. — La bruo ne estis granda!

— Sinjoro kapitano Krikov kune kun subleŭtenanto sinjoro Pustovojtov kaj kun matrosoj iros sur «Obeon», — diris Ievlev, — kaj de la indikita eskortulo per mia nomo demetos ĉiujn kanonojn. Se al la fremdlandanoj ne plaĉos — ligi la ŝipanaron.

Krikov kaj Pustovojtov leviĝis.

— Atendu! — ordonis Ievlev. — Kiam vi la kanonojn sur la bordon per homoj kaj boatoj liveros, loku ilin, laŭ ordono de sinjoro kolonelo, tra la tuta ŝtona urbo, en la Komercaj kortoj

— la rusa kaj la fremdula... Kio pri la vojevodo? Ĉu li plu malsanas?

Ĥagajo Pustovojtov malestime ridetis:

— Sed kion li faru? Ekmalsanis pro timo, eĉ la nazon ne elŝovas.

Ievlev strabis al Ĥagajo: ankaŭ tiu ĉi same, ankaŭ al tiu ĉi la vojevodo la vojon baras!

Li diris mallaŭte:

— Ne ni, sinjoroj konsilio, kaj ne nun juĝu la princon. Li desupre estas starigita al vojevodeco, li antaŭ la Siro respondos. Iru. Ĝis vespero pri la kanonoj necesas ĉion fini.

Li trinkis akvon, por trankviligi sin, nerimarkeble pririgardis la homojn, komprenante: ili devas defendi la urbon, sed ja neniu el ili esperas al la vojevodo, neniu eĉ je grajno fidas la princon, li estas malamata kaj malestimata.

— Pri ŝipoj niaj estos la parolo, — komencis la kapitan-komodoro. — Por tio mi kolektis vin hodiaŭ, sinjoroj konsilio. En Solombalo sur ŝipglitejoj staras ŝipoj, kaj ĉe Jozefo Andrejeviĉ en la konstruejo estas finataj en Vavĉugo. Kvar estas sur akvo — lanĉitaj, garnataj. Se svedaj militistoj enrompiĝos — estos pereo, ili bruligos ĉiujn. Pri tiu temo necesas pensi kun tuta diligenteco, senprokraste...

Teodoro Baĵenin interflustris kun Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ; alpremante la manojn al la kava brusto, li komencis timide konsili, kien necesas forkonduki la ŝipojn. Jozefo forsvingis la fraton, kvazaŭ tedan muŝon, roris, ke ĉio estas galimatio, ŝipo ne estas kudrilo, ĝin ne eblas kaŝi, kaj se vi kaŝos — tiam la svedoj tutegale ekscios, kie estas la rusia

floto kaŝita. La donanoj-ŝipistoj kun furiozo atakis Jozefon, kriis, ke kaŝi necesas, ke ĉe ili en Dono oni lerte kaŝas ajnajn ŝipojn — neniu povas trovi.

Silvestro Petroviĉ rigardis al la sata, memkontenta vizaĝo de Jozefo Baĵenin, divenis liajn kaŝitajn pensojn, pri tio, ke ne domaĝas li homan laboron, ne domaĝas la ŝtatajn ŝipojn, ne granda laŭ li estas malfeliĉo: forbruligos la svedo la ŝipojn — ni novajn konstruos, aliajn forbruligos — ni ankoraŭ faros.

— La fisko ja ne estas senfunda, mi pensas! — retenante koleron, diris Ievlev.

Baĵenin rideris, malfleksiĝis sur la benko, elmetinte antaŭen la ventron:

— Kio?

— La ŝipoj laboron grandan kostas! — diris Ievlev. — Nemalmulte da popolo oni per la piedoj antaŭen el la ŝipkonstruejoj forportis, dum ili estis konstruataj.

— Popo-olo! — subridis Baĵenin. — Ĉu estas granda afero — popolo! Inoj naski ne mallernis — estos popolo. Kaj kio pri la fisko, sinjoro kapitan-komodoro, do ni ankaŭ al la fisko helpos, ne mizeraj almozuloj ni estas, ne fremdaj homoj, kvitiĝos se ne hodiaŭ, tiam morgaŭ. Vi aŭskultu, Silvestro Petroviĉ, kion mi diros...

Li kun grako leviĝis de la benko, demandis:

— Kun paso de tempo kion ni veturigos sur ŝipoj trans la maron?

Ĉiuj silentis. Jozefo respondis al si mem:

— Niajn varojn ni veturigos, profitoj iros en nian monsakon

mem.

— En kies — nian? — demandis Semisadov.

— Ĉu?

— En kies — nian? Ĉu en mian?

— Vi per la langoo ne muelu! — trankvile respondis Baĵenin. — Ne pri vi temas. Plu aŭskultu, sinjoro kapitan-komodoro...

Jozefo parolis longe, la homoj rigardis al li moke, Teodoro tusetadis, malkviete moviĝadis sur sia loko, finfine tiris la pli aĝan fraton je la basko de la kaftano. Jozefo ĉitis al li, li kvietiĝis.

— Gudron ni veturigos, — fleksante la dikajn mallongajn fingrojn en ringoj, estis diranta Jozefo, — kanabajn fibrojn! Jufto nia ĉe ili ĝuas grandan honoron. Peltojn ni veturigos — mustelon, linkon, gulon, vulpon. Kandelojn ankoraŭ sebajn Vologdajn, potason, mielon, vakson...

Li stamfis per la piedo en boto, paŝis antaŭen, kriis:

— Ĉie ni iros komerci, kun Petro Aleksejeviĉ mem ni pri tio interkonsentis. Sed vi, sinjoroj militistoj, ne embarasu nin, kaj ni repagos, vi nin eterne dankos. Ho Dio ĉiopova! Kanabon ni veturigos, tritikon, peĉon, lanugon molanasan, salmon, premos ni ilin per nia varo, prezon faligos, la unuaj negocistoj iĝos. Ankoraŭ negocisto Litkin kun kamaradoj ricevis pri tio la caran benon. Nia estos la komerco, sed ne ilia, sur la genuojn ili antaŭ ni ekstaros, rememoros, kiel ni al ili riverencadis...

— Kaj poste vi repaciĝos! — el sia angulo diris Semisadov. — La sia al la propra ĉiam estas kara. Kial vi, Jozefo Andrejeviĉ, ardiĝas. Ĉiuj vi estas samaj.

— Kiel do? — ruĝiĝante, demandis Jozefo. — Ĉu mi ne rusa estas homo? Ĉu sur mi ne estas kruco? Ci, kampulo, parolu, sed ne deliru...

Semisadov fajfis, balancis la kapon:

— Ne videblas ja sur vi kruco, sinjoro Baĵenin, Jozefo Andrejeviĉ. Sed atendu, ne furioziĝu, mi vin ne timos. Kaj ĉu vi estas rusa aŭ ne rusa, tion, certe, tuj diri ne eblas. Ne memoras mi, ke vi niajn fratojn kontraŭ la fremdlanda knuto defendis en tiuj tempoj, kiam ni ŝipojn konstruadis.

Baĵenin ekstamfis, Silvestro Petroviĉ frapis al la tablo, kriis:

— Ne en bazaro! Eksidu, sinjoro Baĵenin. Kaj ankaŭ vi, ferdekestro, tio... estu pli kvieta...

Li renkontis ridantan vivan rigardon de Semisadov, pensis: «Bona estas la oĉjo. Tia ĉion povos. Se sendi lin kiel piloton sur svedan militan ŝipon — li ĉion faros kiel necesas, eĉ ne palpebrumos...»

Per firma voĉo, pririgardante la kunvenintojn po unu, kvazaŭ mezurante fortojn de ĉiu por la estonta afero, li komencis ordoni — kiu kian laboron faru. Da klopodoj por ĉiu evidentiĝis abunde, nur sola Jozefo Baĵenin restis sen ajna tasko. Kolerante, li eliris el la ĉambro, frapis per la pordo. Silvestro Petroviĉ kvazaŭ nenion rimarkis. Ili ree komencis diskuti, kie kaŝi la floton.

Ievlev dismetis sur la tablo mapon, Semisadov aliris pli proksime, per la trapeĉita fingro montris malgrandan havenon, diris flustre:

— Vi prefere rigardus mem, sinjoro kapitan-komodoro...

— Mi rigardos! — same nelaŭte respondis Silvestro Petroviĉ.

Ili ankoraŭ interparolis, Silvestro Petroviĉ dankis pro bonaj konsiloj, diris, ke la floto nepre estos kaŝita, kaj kie — tio decidiĝos baldaŭ. La homoj komprenis singardemon de la kapitan-komodoro, komencis leviĝi, foriri...

Ĝis la tagmezo Ievlev restis kun Semisadov kaj la pafista estro. La kancelarianoj alportis montri fiskajn kalkulojn pri asigno de mono kaj pano al laborantoj, Silvestro Petroviĉ legadis longajn foliojn kaj rakontadis, kion li vidis dum sia inspektado, kiel fortiĝis la fortikaĵoj por kontraŭstaro al la svedo. La Kola fortikaĵo nun eltenos seriozan sieĝon, la Solovkiaj monaĥoj same ektimis: arĥimandrito Firso rekonsciiĝis, pelis siajn pigrulojn al la afero. Fortikaĵoj Pustozerska, Suma, Kemo, Mezeno — atakon de eskadro apenaŭ eltenos, sed al la atakantoj estos varmege. La popolo — laborantoj — mortas multe: malsato, humido, febro.

La pafista estro suspiradis — nenion eblas fari, por ĉio estas la Dia volo; Semisadov sidis, malalte mallevinte la kapon.

— Kio pri niaj arestitoj?

— Ja kio al ili fariĝos? — respondis Semisadov. — Nutras ni ilin sufiĉe, malbonon por si ili ne atendas, vivas — ne ploras. Ripley, la kanona majstro, bieron postulis en la citadelon — ni donis. Inĝeniero Lebanius komence timis, sed nun — reviviĝis. Kaj kiu estis la unua prenita — fiŝisto Swenberg, — tiu korbojn vergajn plektas en libertempo, ja libertempo multas.

— Ili sidu plu, sen ili estas pli trankvile! — diris Ievlev. —

Poste, kiam la batalo finiĝos, ni liberigos, pelos for... Ĉu mi ĝuste diras, ferdekestro?

Semisadov levis la kapon, subridis:

— Ĝuste, Silvestro Petroviĉ. Ni vivu almenaŭ malgrandan tempon sen ili, eĉ sen tio rajdantoj por nia frato ne kalkuleblas...

— Kiaj tiaj rajdantoj? — mire rigardante, demandis pafista estro Simono Borisoviĉ. — Pri kio vi parolas?

— Ja kiuj sur kampulo rajdas! — firme respondis Semisadov. — Ili estas rajdantoj.

— Tro saĝa vi iĝis! — tranĉis la kolonelo. — Jen kion elpensis...

— Nu, Simono Borisoviĉ? — demandis Ievlev, kiam Semisadov foriris. — Rakontu, kiom da muskedoj, kaj fusiloj, kaj blankaj armiloj vi akceptis, dum mi ĉi tie ne estis? Mi vidas — nemalmulte, se vi ne plendas.

La kolonelo respondis, ke vere nemalmulte, estas peke plendi. Kaj la armilaro estas bona, ne avaris Moskvo. Silvestro Petroviĉ prenis plumon — skribis liston, penseme demandis:

— Se iujn homojn kolekti — ĉasistojn, doni al ili armilojn bonajn, sidigi laŭ Dvino en sekretaj lokoj, tie, kie la ŝanelo estas pli proksima al la bordo, ili faros al la latronoj malfeliĉojn, ĉu? Kiel vi opinias? Se subite okazos peko — trarompiĝos la sveda eskadro?

Simono Borisoviĉ kuntiris la brovojn, prenis la liston, kalkulis mense, rezoneme prononcis:

— La afero estas bona. Homoj ĉi tie estas kiel falkoj,

sentimaj, lertaj; la okulojn havas de Dio. Nu, kaj pulvon laŭ la ĉasista kutimo ŝparas, vane ŝargon ne uzos.

Ievlev prenis ankoraŭ folion da papero, per la plumo maldike skizis, kie estu la ĉasistaj embuskoj. La kolonelo konsilis ĉion ĉi doni al Krikov: li mem estas el ĉasistoj, lin la popolo konas, kaj li la homojn konas. Do li ilin komandu.

El la Sepurba domo Silvestro Petroviĉ rajde trotis en Muskojn al Taisja, por rigardi la baptofilon, kiun li delonge ne vidis, kaj demandi, ĉu ne estas ia urĝa bezono. Taisja renkontis lin kiel ĉiam — kviete, afable. Nenio vidvina estis en tuta ŝia aspekto, eĉ unu plendan vorton ŝi ne diris, dum li sidis en la ĉambro. Ĉio, laŭ ŝiaj vortoj, estis bone dank' al Dio, ili vivas kun pano kaj brasiksupo, brulligno por la vintro estas rezervita. Atanazio Petroviĉ, bona homo, eltranĉis novajn tabulojn — fari sarafanajn kaj tablotukajn stampornamojn, tiuj ornamoj bone vendiĝas en la bazaro, nur hastu fari. La laboro estas gaja, pura, kun tia laboro vivi ne estas enue. Venas iam Semisadov, ĉiam persvadas Taisja-n serĉi fortunon en mara afero.

— En kiu do? — miris Ievlev.

— Ja kiel logaĵistino iri en la maron aŭ kiel remistino, — ridetante, respondis Taisja. — Ĉe ni, Silvestro Petroviĉ, multaj virinoj en la maron iradas. Eĉ rudristinoj ekzistas. Mi ja la maron ne tre timas. Ivano Sabateiĉ plurfoje kun mi en la antaŭ longe pasintaj jaroj al ĉasadoj iradis, — ne skoldis min...

— Ni atendos iomete, kaj ankaŭ mi iros! — diris Ivaĉjo, maĉante nuksojn en mielo, alportitajn de Silvestro Petroviĉ.

Li sidis samtie sur la benko, fosis per ambaŭ manoj en la paperkorneto kun dolĉaĵoj.

— Ankoraŭ kion mi deziris diri, Silvestro Petroviĉ, — ekparolis Taisja. — Ne taŭgas por vi familion vian en la citadelo teni. Povas io okazi, — la filinoj estas malgrandaj. Antaŭ nelonge Maria-n Nikitiŝna-n mi tiel persvadadis al mi transloĝiĝi, — ĉe ni estas kviete, ĝardeneto estas, por kio do en la fortreso...

— Nu, kaj mia Nikitiŝna kion diris? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ne, diris, ne veturos mi.

Ievlev ridetis:

— Jene, ne. Mi mem pri ĉi temo eĉ paroli ĉesis. Kaj ŝi, kaj vi, Taisja Antipovna, — ambaŭ vi estas obstinulinoj. Eble, tiel estus pli bone, sed la koro malpermesas. Kaj donu al vi ambaŭ Dio pro tio...

Taisja komprenis, pri kio parolas Silvestro Petroviĉ, ruĝiĝis, diris apenaŭ aŭdeble:

— Ne povas mi, Silvestro Petroviĉ. Kaj al li malbone estos, kaj mi ne povos vivi kun li...

Ievlev silente klinis la kapon.

Adiaŭante, li metis sur la tablon arĝentan rublon «por dolĉaĵoj por la baptofilo», — tiel li faradis ĉiam, se vizitadis la domon en Muskoj. Laŭ silenta interkonsento Taisja akumuladis tiun monon — por la orfo por nigraj tagoj. Ivaĉjo pri la nigraj tagoj ne konjektis, sed la rublojn kalkuladis, mezurante, kiam da ili akumuliĝos tiom, por komenci konstrui por si negrandan velboaton.

— Do kio? — demandis Ievlev sur la perono. — Ĉu vi

veturos al mi en la fortreson, Ivano Ivanoviĉ?

— Ni veturos! — venkante sian paperkorneton, respondis Ivaĉjo. — Oĉjo Ataĉjo prenos, li promesis. Sed se per kanonoj oni pafus... Ja en la pasinta fojo eĉ unu ne pafis.

— Eble, ni pafos! — kun mallonga subrido diris Silvestro Petroviĉ. — Do vi venu...

— Atendu! — ordonis Ivaĉjo.

Ievlev kliniĝis al li, kisis al la rigidaj malvarmetaj vangetoj, riverencis al Taisja, deligis la ĉevalon. Ivaĉjo malfermis la pordegon, la ĉevalo tuj ekiris per vigla troto.

3. Kanonoj kaj ĉenoj

La kanonojn de la eskortulo «Obeo» kapitano Krikov kaj subleŭtenanto Pustovojtov liveris en la urbon antaŭ vespero. Timigitaj de la severa karaktero de la kapitan-komodoro, la fremdlandaj ŝipanoj neniom rezistis al forveturado de sia armilaro kaj eĉ mem helpis al la rusaj matrosoj. Kiam finiĝis la tutnokta diservo, Silvestro Petroviĉ mem iris al aliaj ŝipoj proponi al la ŝipestroj profitan por ili negocon: kontraŭ granda kompenso ili havis eblon «pruntedoni» siajn kanonojn kaj pulvan rezervon «portempe» al urbo Arĥangelsko, por ke la loĝantoj de la urbo ne havu damaĝon de la svedaj latronoj.

La ŝipestroj petis tempon por pripensi; Ievlev respondis, ke pensi estas tute pri nenio, kaj tempo nun mankas. La ŝipestroj petis permeson inviti sur ŝipon «Kuraĝa pilgrimulo» konsulon Martus-on; la kapitan-komodoro permesis. Kun Martus venis ankaŭ pastro Fritsch — kvazaŭ hazarde. La ŝipestroj, la estro

de la eskorta ŝipo, la konsulo, la pastoro, Ievlev eksidis ĉirkaŭ tablo en la salono de «Kuraĝa pilgrimulo», kajuta ŝipknabo alportis rumon, kafon, citronojn en sukero. En orita kaĝo kriadis papago. La ŝipestroj fumadis pipojn. Martus bombaste diris parolon pri amikeco de la Moskvia caro kaj de aliaj regnestroj. Tiu amikeco per nenio estas detruebla, ĝi estu eterna, tiu, kiu kontraŭos ĝin, de nenie povas atendi favoron. Post Martus parolis pastro Fritsch, post li — la ŝipestroj.

Ievlev leviĝis, reĝustigis la spadon, surmetis ganton sur la maldekstran manon. Rumo en lia glaso staris netuŝita, la kafo malvarmiĝis en la taso.

— Se ĝis la tagmezo vi ne donos la kanonojn libervole, — diris li impone, — tiam ni ilin prenos per forto kaj sen mono. Sed nun vi ricevos pagon plene. Ni vin fidi ne povas, ĉar unu via ŝipo jam faris provon foriri kaŝe, kial ni ne atendu saman agon de ĉiuj? Ankoraŭ mi opinias mia devo rememorigi la malican murdon fare de viaj homoj de du miaj senkulpaj matrosoj en la tago, kiam multaj homoj el viaj ŝipanaroj minacis al ni per veno de svedaj militaj ŝipoj. Kiel povas ni fidi vian vorton? Kaj ĉu ne estas kelkaj el vi, sinjoroj aliancanoj, homoj amikaj al la sveda flago?

La ŝipestroj postulis la Biblion, por ĵuri. Silvestro Petroviĉ diris rezolute, ke en ĉi aferoj Biblio ne necesas. Martus ree ekparolis, Ievlev, ne aŭskultante, foriris al la ŝtuparo. La papago postkriis al li kolerajn vortojn...

Konsulo Martus atingis la kapitan-komodoron sur la ferdeko, prenis sub la brako, diris, ke la ŝipestroj konsentis, sed nur por pruvi per ĉi ago amikecajn sentojn al la rusa caro. Malsupre ĉe la ŝtuparo de «Kuraĝa pilgrimulo» estis

balanciĝantaj militaj barkoj, tie atendis matrosoj.

— Akceptu kanonojn! — kriis Ievlev malsupren. — Unue ĉi tie, poste sur aliaj ŝipoj. Vigle faru!

Al Ĥagajo Pustovojtov sur la bordo li ordonis: la kanonojn, kiujn veturigis la matrosoj, meti en la ŝipkonstruejo por gardado de la konstruataj rusaj ŝipoj. Al tiuj kanonoj asigni la plej bonajn kanonistojn, por ke la svedoj, eĉ penetrinte la urbon, ne povu bruligi la ŝipojn. La konstruitaj kaj ekipitaj ŝipoj en la sama nokto, sub komando de Semisadov, foriris en sekretan lokon. Akompanante la ŝipojn, Silvestro Petroviĉ diris al Krikov kun suspiro:

— Se ni povus eliri en la maron sur propra eskadro kaj renkonti la latronojn, kiel necesas, per mara batalo! Ni ankoraŭ estas malfortaj por tio. Ni atendu...

La ŝipoj, kliniĝante, estis degelantaj en diafana perla krepusko de la blanka norda nokto. De Dvino blovis freŝeco, knaradis ĉe la albordiĝejo velboatoj, barkoj, gigoj. Forte odoris je peĉo. Ievlev longe rigardis postsekve la eskadron; poste, kiam ĝi malaperis el la vido, li turnis sin al Atanazio Petroviĉ, demandis milde:

— Kial vi estas malgaja, sinjoro kapitano? Ĉu vi laciĝis? Sed mi intencis ankoraŭ unu aferon al vi komisii. Kaj bonan aferon...

Krikov ĵetis al Ievlev scivolan rigardon. Silvestro Petroviĉ rakontis pri la konversacio kun la pafista estro, pri ĉasistoj, kiujn necesis armi kaj meti en sekretaj lokoj laŭ la Dvina bordo.

— Tiajn homojn ni trovos! — respondis certe Krikov. —

Kuglon vane ili ne malŝparos, tio estas vero. Kaj rudriston per kuglo ili faligos, kaj eĉ ilian admiralon mem. Do, bone...

— Faru jam hodiaŭ.

— Mi ne prokrastos.

Kiam ili sidiĝis en velboaton ĉe la Resurekta kajo, desupre, laŭ deklivo, ekkuris homo en senzona ĉemizo, nigra, longakrura. Ievlev demandis, kiu estas li. Matroso Stepuŝkin respondis:

— Majstro. Forĝisto oni lin nomas, el la Kanona korto. Sur la Markan insulon li bezonas. Ekde la mateno li al ni venadas.

Atanazio Petroviĉ subite gajiĝis, diris al Ievlev kun bonkora subrido:

— Ho, interesa viro estas ĉi Forĝisto. Konis mi lin, kiam li mondofinon antaŭdiradis kaj preskaŭ sin forbruligis kun skismaj ermitoj...

— Ankaŭ mi tiam lin vidis, — respondis Ievlev. — Sed nun li estas majstro, granda lertulo, sorĉisto en sia afero.

Teodozo alkuris anhelante, per borantaj okuloj rigardis al Silvestro Petroviĉ kaj Krikov, poste eksidis, malligis pakon — komencis manĝi panon kun cepo. Ievlev demandis, por kio li bezonas iri sur la insulon; li respondis, ke pro afera neceso. Silvestro Petroviĉ kun plezuro pensis — saĝa estas la ulo, li finfaras la kaŝitan ĉenon kaj pri la sekreta laboro ne babilas vane.

Vespermanĝinte, Forĝisto turniĝis al la akvo, ekdormetis. Dormetis ankaŭ Silvestro Petroviĉ, — nun li ellernis ripozi en ĉiu libera minuto. Ili albordiĝis al la Marka insulo, ordonis al la

matrosoj atendi. Nemalproksime, trans salikaro kaj betuloj, en kurantaj nebuloj de blanka nokto estis flagranta lignofajro, aŭdiĝis kanto:

Proda forto tiam en li ekflamiĝis do,
Proda sango tiam en li ekleviĝis do.
Li elprenis el ujo sian akran sabron,
Kaj forhakis al la bojaro l' ardan kapon...

— Kiu kantas? — demandis Ievlev, preminte la kubuton de Krikov.

— Atendu, Silvestro Petroviĉ, finaŭskultu! — kvazaŭ ordonis Krikov.

Ili staris sub malalta kurba betulo kaj aŭskultis, kiel kelkaj dekoj da voĉoj kantas ĉe la lignofajro:

Kaj dumaaj la bojaroj do ektimis,
Kaj en carajn ili halojn-ĉambrojn tuj diskuris,
Ekparolis mem patro la kristana car':
«Jermak' en embaraso sidas, mem ĝin regas,
Kion ni ankoraŭ al Jermako faru?»
Kaj neniu princo lin tiam respondis,
Kaj la car' pri ĉiuj kulpoj lin pardonis,
Nur Kazanon, Astraĥanon preni ordonis...

La kanto finiĝis. Krikov staris senmove, kvazaŭ plu aŭskultante, poste diris:

— Jen kiel, Silvestro Petroviĉ... Kazanon kaj Astraĥanon preni ordonis, — malgranda afero! Por kampulo-kozako... Bona kanto...

Li ridetis per bonkora sincera rideto kaj vokis:

— Do, ni iru, ĉu?..

Ĉe la lignofajro sur drelikaĵoj kaj plektitaj el vergoj sternaĵoj kuŝis laborantoj, ĝuste tiuj, kiujn antaŭ nelonge kaptis en arbaroj apud Dvino leŭtenanto Meĥonoŝin, ili estis manĝantaj el lignaj bovloj likvan kaĉeton, almanĝadis per malmolaj flanoj. Silentulo, kovrita de barbo ĝis la brovoj mem, ne manĝis — sidante ĉe arbostumpeto, li suĉadis memfaritan pipon. Neniu leviĝis, kvankam ĉiuj vidis — iras la kapitan-komodoro kun Krikov. Ili batadis kulojn, maĉadis, silentadis.

— Saluton, laborantoj! — diris Silvestro Petroviĉ.

La viroj respondis malakorde. Ievlev elprenis el la poŝo pipon, plenigis per tabako, petis fajron. Al li oni donis braĝon el la lignofajro. Silentulo de malproksime rigardis al li per brilantaj, ne palpebrumantaj okuloj.

— Kial do latronoj ne venas? — demandis kun riproĉo grizhara viro. — Oni promesis, estos latronoj baldaŭ, ni nian aferon kun tuta hasto faris, sed la latronoj ja ne estas, ne venas. Ĉu ektimis ili nin?

— Evidente, ektimis! — respondis Ievlev, kun plezuro aŭskultante la viron.

— Ĉenojn niajn sekretajn ektimis, — diris alia vireto kun ruza kaj saĝa rigardo de la malgrandaj okuloj. — Ja ĉu povas ŝipo venki niajn ĉenojn — ferajn, forĝitajn...

— Kiam batiĝos al la ĉenoj — tuj dronos! — diris larĝŝultra viro kun pala vizaĝo kaj elŝiritaj nazotruoj, elrigardinte el post la lignofajro. — Diligente la fostoj estis starigitaj, ni ne ŝercis — fosis...

Ievlev fiksrigardis, demandis:

— Kaj al vi pro kio la nazotruoj estis elŝiritaj?

La viro respondis ne tuj:

— Gaja mi estis en la junaj jaroj, diris malĝustan vorton, do jen pagis...

La grizhara interrompis:

— Vi, sinjoro, prefere nin ne demandu, kiu kaj pro kio. Ne necesas!

— Vere, ke ne necesas! — diris Silentulo. — Ni iru prefere la turnoŝeklojn rigardi, kiel kio estas farita!

Li leviĝis, frapis al la vango per la polmo — mortigis kulon, ne retrorigardante, ekiris antaŭen. En arbustaro Krikov atingis Silentulon, ili pri io rapide ekparolis. Silvestro Petroviĉ iris malantaŭe, apogante sin sur la bastono, pensis: «Pri kio ili povas paroli?»

Ili preteris la baterion, la soldatoj salute prezentis la armilojn al Ievlev; Silvestro Petroviĉ rigardis — la kanonoj estis metitaj bone, de la rivero ili estis nevideblaj, kaj por kanonistoj estis oportune pafi de sur traba podio. Bravulo Rezen ankaŭ ĉi tie aranĝis ĉion racie...

La maŝino por streĉi la gardajn ĉenojn transverse de la rivero same estis instalita kaŝe, inter malaltaj pinoj kaj piceoj en neprofunda kavo, por ke la latronaj ŝipanoj ne vidu, kiel oni komencos survolvi sur la tamburon la ĉenojn kaj per tio prepari pereon al la ŝipo. Kaj la bordo mem ĉi tie estis fortikigita per enfositaj traboj, por ke ĝi ne glitu kaj ke ne elfalu la turnoŝekloj kun la tamburo...

— Bone farite! — diris Ievlev, frapetante per la bastono la

trabojn. — Kiu metis? Ĉu Rezen?

— La inĝeniero ne estis ĉi tie! — respondis Silentulo. — La inĝeniero nur sian helpanton sendis — la tamburon ĉenan meti kaj stangojn por ĝi. Ĉion ceteran ni mem faris. Jen ĉe ni estas majstro — Forĝisto, li tion faris.

— Ĉu ĝi retenos ŝipon? — demandis Silvestro Petroviĉ.

Teodozo eliris antaŭen, glatigis sur si la ĉemizon, respondis nehaste, rezoneme:

— Dependas de tio, kiel ĝi batos! Sed ne gravas, por ioma tempo ni ajnan ŝipon retenos, kaj tiam la kanonoj komencos pafi, vi de la fortreso per ardigita kuglego salutos, la kanonistoj — el ĉi tie. Ili nun sur la Marka insulo havas bonan baterion: kaj mortiroj estas, kaj haŭbizoj pafos. Ne skarabo ternos. Antaŭ nelonge per velboatoj oni pulvon veturigis, kuglegojn, — gratos sin la svedo!

— De bordo en mallarĝejo al ŝipo pafi estas oportune! — diris Silentulo. — Ni ne videblas, kaj ĝi tuta estas kiel sur la manplato...

Ievlev tuj turniĝis al Silentulo, demandis:

— De kie vi ĉi tion scias? Ĉu vi estas de Volgo? Estis rabisto? Predon ĉasadis?

Silentulo respondis trankvile:

— Kial, sinjoro kapitan-komodoro, predon? Kiuj predon ĉasas — ties kapoj nun sur palisoj sidas. Sed ni, dankon al la Kreinto, dume estas vivaj kaj sanaj, ĉe ŝtata afero fiskan kaĉon maĉas. Rabistoj predon ĉasas, sed ni estas homoj kvietaj, ni Volgon eĉ dum momento ne vidis.

Viroj ĉirkaŭe singarde ekridis, ridetis ankaŭ Atanazio Petroviĉ Krikov.

Ievlev komencis rigardi, kiel Forĝisto laboras kun la ĉeno per malpeza martelo: kontrolas, ĉu bone kunfiksita. La lerta malalta vireto estis helpanta lin. «Do, nun je la ĉeno eblas kalkuli, — pensis Silvestro Petroviĉ, — kaj ankaŭ je multo eblas kalkuli, multo estas farita ne por unu jaro kaj ne por du».

Li malrapide pririgardis la kanonojn, kiuj nigris en la batalaj remparoj de la Novdvina citadelo, — tie da ili staris tute sufiĉe, malbone estos al la svedo. Hodiaŭ estas preta la ĉeno, morgaŭ Atanazio Petroviĉ kolektos ĉasistojn...

Kun knaro albordiĝis la velboato; la matrosoj, oscedante, ĵetis malpezan ponteton.

Sur la insulo trans la arbustaro kaj betuloj, ĉe la lignofajro, oni ree ekkantis. La vortoj ne aŭdeblis, nur la melodio — glata, majesta kaj samtempe arda — ĉiam pli larĝiĝadis, ĉiam kreskis, nun, verŝajne, ĝin oni aŭdis ankaŭ en la citadelo.

Ie malproksime en la travidebla aero batis pafo.

Ievlev fiksaŭskultis. Oni ne plu pafis, nur la kanto sonis ĉe la lignofajro...

— En la skansoj oni pafis! — diris Silentulo. — Tie oni fiŝistajn boatojn pelas, kiuj en Dvinon iras... Ili havas grandegan arkebuzon, pulvon ili ne ŝparas, batas tiel, ke en Arĥangelsko oni aŭdas...

Kiam la velboato de la kapitan-komodoro debordiĝis, Forĝisto ĵetis la martelon kaj tenajlon sur la teron, viŝis la manojn kaj vokis Silentulon flanken, trans fortikan salikan arbuston.

— Ĉu malbone? — fiksrigardante Forĝiston, demandis Silentulo.

— Malbone!

— Kaj kio?

— Eksciis la damnita vojevodo.

Silentulo strabis al Forĝisto.

Tiu rakontis, ke iu el subskribintoj de la petskribo pri Prozorovskij fanfaronis, ke nun la koruptulo ne longe furiozos, iros al Moskvo alia petskribo, kie la tuta vero estas skribita pri tio, kiel per forto, per knuto devigadis ĉi latrono metiistojn, komercistojn kaj Blankmarajn laborantojn siajn subskribojn meti, kvazaŭ ili deziras lin kiel vojevodon por ankoraŭ du jaroj.

Morniĝinte per la vizaĝo, Silentulo kunpremis la pezajn harajn pugnojn.

— Babiluloj, diabloj! Fanfaronis...

— Ne pri tio nun temas. Aresti, probable, komencos la vojevodo. Kiom da sango verŝiĝos...

— Verŝiĝos? — raŭke demandis Silentulo. Kaj respondis: — Verŝiĝos! Kaj ĉu mi vin, stultulon, ne avertis? Juston li, vidu, ekbezonis! Grizhara estas tuta, sed saĝon ne akiris. Nun oni vin pendigos...

Forĝisto silentis, aŭskultis, kuntirinte la brovojn. Poste subite liaj okuloj ekbrilis, li ekparolis per furioza ŝiriĝanta flustro:

— Ĉu pendigos? Kaj pendigu! Mi ĝis la ĉerko la juston serĉos. Ĉe Dio mi ne trovis, nun mi trovos sur la tero peka. Li arestu, monstro! En lian muzelon mi kraĉos, al la maliculo

damnita. Li min torturu kiel deziros, antaŭ la morta horo mi krios ĉion, kion mi scias, ĉiujn krimojn liajn, ĉiujn fiaĵojn...

— El torturejo ja ne aŭdeblas! — kolere subridis Silentulo. — Ne sola vi troviĝis kuraĝulo en torturejo veron krii. Kaj antaŭ vi tiaj estis, sed ne tre multe ni aŭdas...

— Tutegale mi krios. Kie do oni vidis tion — per knuto kaj en torturejo devigi subskribi?

— La nova petskribo do ĉe kiu estas?

Forĝisto prokrastis respondon, pensis iom.

— La petskribo estas en fidindaj manoj. Estas peko perdi ĝin. Per sia sango homoj siajn subskribojn metis, krucojn per la sango markis...

— Kie, mi demandas, ĝi estas kaŝita?

— Ĉe Krikov Atanazio Petroviĉ.

— Ĉu li mem scias, kio estas tiu papero?

— Li legis.

— Kion li diris, kiam tralegis?

— Li ridis.

— Ridis? — miregis Silentulo.

— Ridis! — obeeme ripetis Forĝisto. — Ne multe, diris, helpos al vi ĉi larma skribaĵo. Kun ili per palisoj necesas, kaj per hakiloj, per fajro, sed ne per petskribo... Tamen, li diris, kiel vi mem deziras. Vi, diris, Teodozo, estas homo saĝa. En ĉerko vi kuŝis, Ĥanoĥon atendis. Vi, frato, ne devas kutimiĝi. Ĝisatendos vi la caran favoron, kiel Ĥanoĥon vian vi ĝisatendis...

Silentulo diris «hm!» en la nigran barbon. Forĝisto suspiris. Poste demandis:

— Kion do faru mi? Hieraŭ en la Kanonan korton kancelariano venis — flari, demandi. En la arestejon preni tuj ili timas, mi sola en la Kanona estas majstro, Ievlev povas brui...

— Fuĝi vi bezonas.

— Fuĝi, vere. Sed la Kanona? Kiu tie faros do? La svedo ja estas proksime!

Ili pensis longe, nenion elpensis.

— Vinon mi drinkus! — diris Teodozo kun angoro.

Vino ne estis, do ili kuŝiĝis dormi, manĝinte likvan kaĉon. Dum dormo Forĝisto turniĝadis, ĝemadis, ĵetiĝadis...

4. Hejmen revenis!

En travidebla blanka nokto la barko, kiu jam alproksimiĝis foje al la rivera buŝo, denove aperis nemalproksime de la skansoj. Jegorĉjo ree surkuris la turon, elkaptis el la manoj de la gardanto la lornon, rigardis, diris kolere:

— Nu kion fari? La samaj, kiuj estis antaŭ nelonge. Kaj kien ili vagis?

Li rigardis ankoraŭ, balancis la kapon:

— Ne niaj! La kaftanoj estas malvastaj, aŭ norvegoj, aŭ iuj aliaj fremduloj...

La kaporalo preparis la arkebuzon kun duobla ŝargo de pulvo, pafis, ŝanceliĝis, longe staris, palpebrumante, kvazaŭ frenezulo.

— Velboaton — sur la akvon! — abrupte ordonis Pustovojtov.

La doganistoj surakvigis la velboaton, eliris transverse al la barko, kiu estis lerte kaj certe eniranta en la buŝon, kondukata de mano de sperta rudristo.

— Bone iras! — diris Jegorĉjo, admirante. — Bele! Kaj la velojn ili neniom malhisis... Nu, pafu ankoraŭ — eble, ili ne aŭdis?

La kaporalo kun timo pafis ankoraŭ foje. El la gardoturo videblis, kiel la maristoj sur la barko mallevas la velojn — nun ili komprenis, ke estas ordonite halti. La dogana velboato aliris al la barko ĉe la pobo, kelkaj soldatoj grimpis sur la ŝipon, kiu nun sidis sur la akvo alte, kvazaŭ ĝi iĝis malpli peza. Poste la maristoj ĵetis de la pruo haŭseron, la velboato per remiloj kondukis la barkon al la dogana albordiĝejo. La dragonoj ne eliris, dormis, Meĥonoŝin estis dibocanta en la vilaĝeto — tie aperis al li amoro. «Sen ili estas pli trankvile! — pensis Jegorĉjo. — Ja ili tuj: trenu en la arestejon».

Pustovojtov, fajfetante, malleviĝis malsupren, rearanĝis la uniformon, reĝustigis sur la flanko la rektan sabron kaj per estrecaj paŝoj ekiris renkonti la aventuristojn, kiuj dum dua tagnokto krozas apud la bordoj kaj impertinente intencis trairi preter la skansoj, kvazaŭ ne scias la caran ukazon.

— Kiaj homoj? — demandis li la doganejan skribiston, kiu la unua desaltis de la velboato sur la teron kaj hastis por papero kaj plumoj — skribi la pridemandan folion.

— Ja fiŝistoj lokaj, maraj laborantoj, ĉasistoj, — rapide respondis la skribisto. — Sur Grumanto, ŝajne, vintris. Ili diras,

ke ilin en la urbo Arĥanĝela ĉiu ajn konas, sed, eble, mensogas. Unu el ili malsana kuŝas, morti intencas...

— Montros oni al ili en la arestejo Grumanton! — diris Jegorĉjo en kolero. — Grumanto! Ne estas permesite, sed ili jen...

Kaj li rigidiĝis kun malfermita buŝo, ne findirinte. Sur la barko je plena alto staris nigrabarba, maldika Timoteo Kislov, antaŭ du jaroj malaperinta en la maro. Staris kaj kvazaŭ nenio okazis interinsultadis per raŭka voĉo kun la doganaj soldatoj, kiuj estis persvadantaj lin eliri sur la bordon, por respondi por la skribisto al oficialaj demandoj.

— Sed por kia diablo mi bezonas demandojn viajn! — estis diranta Kislov. — Mi, eble, rusan ŝvitbanejon dum longaj jaroj ne vidis, mi, eble, nur per sola neĝo min lavadis, kaj li — demandojn! Kiaj tiaj skansoj povas esti por propra homo? Ĉu mi estas fremdulo, por ke pri mi doganan liston skribi...

— Timoteo Nikitiĉ! — kriis Jegorĉjo. — Ĉu vi vere viva revenis?!

— Ja ne, malviva! — kun ĉagreno diris la rudristo. — Ĉu vi, Jegoro, ĉi tie estas la estro? Kial oni nin tenas? Ĉu ni malmulte da malfeliĉo havis? Hejmen ni revenis, sed eĉ ĉi tie ne estas bone?

Jegorĉjo timide paŝis antaŭen, leviĝis laŭ la ponteto, ankoraŭ ne kredante sin, demandis:

— Kislov? Kaj vere... mirinde!

— Ki-i-islov! — mokimitis la rudristo. — Jen miraklon vi trovis! Kio Kislov, kiam mem Ivano Sabateiĉ estas ĉi tie! Ĉu gravas de Kislov du jaroj, kiam Rjabov kun kamaradoj ne du,

sed preskaŭ kvar trasuferis...

Kaj, kliniĝinte al la luko, Kislov laŭte kriis:

— Ivano Sabateiĉ, vivi eliru!

Jegoro oĥis, ŝoviĝis al la luko, sed tie ekknaris ŝtupoj, kaj tuj el la kajuto aperis Rjabov — tute sama, kia estis antaŭ kvar jaroj. Oscedante kaj tirante siajn fortikajn ŝultrojn, li atente ĉirkaŭrigardis kaj prononcis tire, nehaste, per konata de la infaneco voĉo:

— Jen! Do ni vere estas hejme!

Elgrimpinte sur la ferdekon, li diris al Jegorĉjo, kvazaŭ ili vidis unu la alian nur hieraŭ:

— Jen kia vi estas? En uniformo! Nu, saluton, Jegoro...

Tiu rigardis, rigidiĝinte sur la loko: vere, el la transmondo revenis la homo, sed laŭ la aspekto estis nenio speciala, la rudristo kiel la rudristo, nur iomete griziĝis la kapo, kaj pli malmilda iĝis la rigardo...

— Familio mia kiel fartas?

— Familio? — redemandis Jegorĉjo per stulta voĉo.

— Familio. Ĉu sanas Taisja Antipovna kaj filo mia?

— Sanas, sanas! — kvazaŭ rekonsciiĝinte, rapide kaj feliĉe ekparolis Jegorĉjo. — Kaj orfo via sanas, kaj Taisja Antipovna — la vidvino senkonsola...

La verdaj okuloj de la rudristo gaje brilis:

— Venta kapo! Kia do ŝi estas vidvino kun viva edzo? Kaj Ivaĉjo, mi pensas, ne estas orfo, se mi antaŭ vi estas viva...

Kaj senhaste, ne retrorigardante al Jegorĉjo, li eliris sur la

bordon. Post li ekiris Kislov, lama Demĉjo Borisov, kreskiginta barbeton, aliaj ĉasistoj kaj maristoj. Sur la bordo Rjabov ekstaris sur la genuojn kaj almetis la lipojn al la nigra humida tero. Jam leviĝis la suno kaj per varma lumo estis priverŝanta la verdan rosan herbejon apud la skansoj, la gardoturon, pinojn, la doganajn soldatojn, la senventiĝintan maron kaj la malleviĝintajn sur la genuojn ŝipanojn. Rigidiĝinte, preskaŭ ne spirante, staris la dogansoldatoj kun dragonoj, rigardis, kiel salutas la gepatran Dvinan teron la maraj laborantoj, kiel rapidaj hontaj larmoj fluas sur iliaj malheliĝintaj pro vento vizaĝoj, kiel oni elportis la malsanulon, tute ŝvelintan pro skorbuto, kaj kiel li kun ĝemo almetiĝis per la tuta vizaĝo al malseka hela herbo...

La unua leviĝis Rjabov, frapis Jegorĉjon al la ŝultro, diris:

— Longa vi elkreskis!

— Oĉjo! — prononcis Jegorĉjo, ne konsciante sin pro ĝojo. — Kaj ni jam ne atendis...

— Tamen mi estas viva!.. — subridis Rjabov. — Multajn mi entombigis, sed mi plu vivas. Ne prenas min la maro. Konduku, frato, regalu per kaĉo kaj rakontu, kio ĉe vi okazis. Ĉu oni min en memorpreĝan liston enskribis?

— Enskribis!

— Aŭskultu, Metrio! — vokis Rjabov. — Min oni en memorpreĝan liston enskribis, pro tio mi, verŝajne, estas viva. Diaj ŝercoj...

Demĉjo aliris pli proksime, kuntiris la brovojn:

— Ĉiam vi blasfemas, oĉjo! Ĉu Dio ŝercas? Estas peke eĉ pensi tiel. Jen li nin al la gepatra tero kondukis!..

— Vi depreĝos, preĝulo!

Jegorĉjo kuris klopodi — kuiri por la maristoj kaĉon, la dogansoldatoj trovis vodkon. Timoteo Kislov estis rakontanta al ili:

— Mi venas en la golfon — sur Grumanton, kaj ili estas tie. Kion diri? Barbegojn jen kreskigis, domon bonan konstruis, ursviandon rezervis, fiŝon, boacaĵon... Sur la tuta bordo ili mem mastrumas — kvazaŭ en bojara bieno. Kaj Ivano Sabateiĉ, certe, estas la ĉefo. Jes, do, vivas nemalbone. Nu, krucoj, certe, estas multaj — tomboj: malfeliĉo tie al ili okazis, tion tuj ne eblas rakonti. Kaj nian barkon glacioj katenis, neniel eblas eliri, forŝiri nin el la golfo...

Demĉjo samtempe estis nelaŭte diranta al Rjabov:

— Ĉu la lokon vi ne rememoras, oĉjo? Jen ankoraŭ la gardista budo staras, nigriĝis tuta. Vi tiam kun Taisja Antipovna en la budo anstataŭ domo loĝis, kaj mi al vi ĉi tien venadis, manĝon portadis, kantojn ni ĉi tie kantadis, — jen sur la sablo. Ĉu vi rememoras?

Rjabov tiris Metrion je la maldika barbeto, subridis:

— Jen, ankaŭ ni nun estas kun barbo! Ĉu riĉa vi iĝis? Tiam ĉe norvegoj oni rakontis: en Rusujo, diris, pro barboj oni monon prenas...

Jegorĉjo kapjesis:

— Prenas, oĉjo! Tio estas vero.

— Kaj ke kvazaŭ milito ĉe vi estas — ĉu same vero?

Pustovojtov rakontis, ke militas nun Rusujo kontraŭ la svedo, okazis grandega batalo ĉe Narvo, tiu kolizio finiĝis tre

malgaje: la svedoj havis viktorion[111].

— Kolizio, viktorio! — kun ĉagreno diris Rjabov. — Trovis novajn vortojn kaj bruas sen senco. Vi klare diru: kiu venkis do?

— La svedoj.

— Kial do?

— Ilia forto estis, oĉjo. Nu, kaj la oficiroj-fremduloj, certe, perfidis kaj al ili transiris.

— Kaj kie estas tiu Narvo?

— Ne proksime, oĉjo.

— Ĉu sur tio oni repaciĝis?

— Kial repaciĝis? — ofendiĝis Jegorĉjo. — Estos granda milito. Kaj dume la aferoj estas tiaj: la svedoj eskadron kolektis, oni aŭdas — iras ili mare Arĥangelskon konkeri, ŝipkonstruejojn bruligos, majstrojn ŝipajn mortekzekutos, la ŝipojn aŭ kun si forpelos, aŭ dronigos.

Rjabov aŭskultis atente, eĉ la kaĉon manĝi ĉesis.

— Ĉu fremduloj-oficiroj ĉe vi estas multaj?

— Nun nemultaj! — respondis Jegorĉjo.

La rudristo ree komencis manĝi la kaĉon. Jegorĉjo rakontis, ke en Arĥangelsko nun oni ne stultumas, konstruis fortreson sur Dvino, kontraŭ la svedo gardas sin tage kaj nokte, malfacile estos por li, latrono, detrui la urbon kaj forpeli la floton.

— Kaj ĉu ŝipojn bonajn vi konstruis?

111 Viktorio = venko. Nun arkaikiĝinta pruntvorto en la rusa (виктория), populara en tiu tempo, kp latinan «victoria», anglan «victory», francan «victoir» ktp. *(trad.)*

— Bonajn, oĉjo Ivano Sabateiĉ, bonajn, kaj nemalmulte. Floton. Kaj centkanonajn ŝipojn ni nun havas, kaj fregatojn, kaj jaĥtojn...

— Centkanonajn?

— Centkanonajn, oĉjo.

— Ĉu en la oceanon per via floto vi iradis?

— Intencis en la nuna somero, sed ne sukcesis.

Ili silentis iom.

— Kiu do estras super vi, super la armeo? Ĉu fremdlandano?

— Kial fremdlandano! Estras super ni propra, rusa homo — kapitan-komodoro Ievlev.

— Silvestro Petroviĉ! — ekĝojis Rjabov. — Do, li estis viro ne stulta, sian aferon, mi pensas, scias. Kun li ja eblas...

Jegorĉjo komencis haste rakonti pri Silvestro Petroviĉ. Rjabov aŭskultis penseme, balancadis la kapon. Jegorĉjo ne retenis sin, rapide fanfaronis, ke li nun nepre veturos al Moskvo, en la novan navigistan lernejon, Ievlev promesis, tiam estos li, Pustovojtov, oficiro flota, kiel necesas...

Rjabov interrompis:

— Kaj kiel vojevodo kiu ĉe vi sidas, sinjoro oficiro?

Jegorĉjo flustre, por ke aliaj ne aŭdu, rakontis: kiel vojevodo sidas princo Prozorovskij Aleksio Petroviĉ, estis li en la pasintaj tempoj en Azovo, do lin la popolo promesis sur lancojn levi, ekde tiam li senĉese furiozas, ĉion timas, pro sia timo ĉiel la popolon turmentas kaj subpremas. Ĉe li kiel

dumaano estas Larionov, ĉiujn aferojn li mem regas, ĉiujn subaĉetaĵojn li mem prenas, akiris grandan potencon super la urbo. En Arĥangelsko oni nur esperis, ke post du jaroj da vojevodeco ŝanĝos la caro la damnitan princon, sidigos sur vojevodecon iun alian, laŭ delonga kutimo en Rusujo, sed li, la vojevodo, subite sendis al Moskvo latronan petskribon, kiun dumaano Larionov kun kancelarianoj skribis, — kvazaŭ la metiistoj kaj la komercistoj, kaj ĉiuj, kiuj ĉi tie loĝas, petegas la grandan Siron, por ke lasu li ankoraŭ la gloran vojevodon princon Prozorovskij-on sidi por du jaroj. Petro Aleksejeviĉ al tiu latrona korupta petskribo kredis kaj lasis la princon sur la loko, kaj nun iu — lia nomo sankta estas nekonata — ankoraŭ petskribon skribis al Moskvo, kie la tuta vera vero estas rakontita. Sed tamen tiun petskribon homoj de princo Prozorovskij interkaptis, aŭ pri ĝi detale eksciis, kaj nun la vojevodo furiozas, kiel neniam ankoraŭ furiozis. Ankoraŭ enketado estas deklarita, kaj kiu la petskribon kontraŭ li skribis, tiu estas nomita nun ribelulo, kaj kvazaŭ necesas ĉiujn tiujn ribelulojn pendumi, kiel en la pasintaj tempoj la pafistojn en Moskvo oni pendumadis. Kaj la iniciatinton de la afero estas kvazaŭ ordonite radumi. Oni arestas ĉiajn ulojn, kaj homojn en la torturejo Larionov kun la kancelarianoj torturas senkompate, por ekscii, kiu tiun veran petskribon skribis...

Rjabov suspiris, balancis la kapon:

— Ho, gaje, mi vidas, vi vivas! Ankoraŭ kio estas bona?

— Ankoraŭ — kiu el la maro venis, al ĉiuj tiuj oni faras enketadon: ĉu ne estas ili svedaj militistoj, senditoj, spionoj. Ĉi tie furiozas leŭtenanto Meĥonoŝin, kiu estas estro super la dragonoj, li furiozas pri fiŝistoj, — estas bone, ke nun li

forestas, alie li tuj pelus al la arestejo. Ja vi mem, oĉjo Ivano Sabateiĉ, juĝu: venis vi, eblas diri, el la transmondo, sur la vojo ĉe norvegoj estis, kaftanoj sur vi ĉiuj estas fremdaj, en la buŝon vi ne tuj revenis, foriris ien. Por kio, kien vi tiam kaŝiĝis?

La rudristo ĵetis rapidan, akran rigardon al Jegorĉjo, malaltigis la voĉon:

— Estis por kio, Jegorĉjo. Ni konas kancelarianojn kaj oficistojn niajn, konas, kiaj ili estas ĉikanuloj. Kaj en la barko estis varo ne por ili, ne por iliaj manegoj avidaj, okuloj enviaj...

— Ĉu vi kaŝis?

— Kaŝis, Jegorĉjo.

— Mi pri tio nenion scias! — flustre ekparolis Jegoro. — Sed nur la hundo Meĥonoŝin ne elflaru. Se li elflaros, oni trenos vin al Pozdjunin, kaj kun li, kun bestio, ne eblos ŝerci.

— Ja mi ankaŭ nun ne ŝercas! — diris Rjabov. — Sed kiel li povas elflari?

— Li siajn dragonojn sendis, se estis videble — li ekscios...

Rjabov ne respondis. La suno jam leviĝis alte, kiam la doganeja skribisto finis skribi siajn foliojn. La kaporalo aliris al Jegorĉjo — konsiliĝi, kiel ili agu plu. Pustovojtov ekdisputis kun li, poste diris severe:

— Mi responsos! Tiuj maristoj malfeliĉon vidis tiom, ke vi kaj mi en sonĝo ne vidus. Ĉiujn ilin ni konas. Ili iru hejmen...

— Ĉu per la barko?

— Per la barko ili ne ĝisiros, oni interkaptos ĉe la citadelo. La barkon ili ĉi tie lasos, kaj mem iros perpiede...

La kaporalo dubis:

— Ĉu ili en tiuj kaftanoj norvegaj la urbon ĝisiros? Kaj kun barbegoj, kaj sen barbosignoj? Ĉe la unua bariero oni ilin kaptos.

Jegorĉjo proponis sin por akompani. Dogansoldato alkondukis brunan ĉevalinon, li sidiĝis, reĝustigis sur la kokso la spadon — kvankam juna, sed brava: trikorna ĉapelo, uniforma kaftano, altbotoj kun spronoj, gantoj.

— Jen vi kielas! — diris Rjabov aprobe. — Nemalbona knabo. Ĉu en la floto vi servas aŭ kiel?

— Kvazaŭ en la floto! — ruĝiĝinte, respondis Jegorĉjo. — Ne instruita mi ankoraŭ estas, Ivano Sabateiĉ. Jen antaŭ nelonge estis mi en Moskvo en navigista lernejo...

Kaj li ree komencis rakonti, kiel li vidis Gwyn-on kaj Grace-on, kiel li parolis kun multesaĝa mentoro de la navigista lernejo sinjoro Magnickij Leontio Filipoviĉ, kiel ĉi Magnickij promesis akcepti en la lernejon Jegorĉjon kaj aliajn junajn navigistojn, kiuj la maron laŭ sperto scias kaj mem travivis kaj ŝtormojn, kaj forajn oceanajn navigojn, kaj diversajn aventurojn.

Rjabov paŝadis enpensiĝinte, preskaŭ ne aŭskultis la babiladon de Jegorĉjo, tamen Demĉjo Borisov voris per la ardaj nigraj okuloj Jegorĉjon, ne preterlasis eĉ unu vorton, eĉ la vojon antaŭ si ne vidis — ĉiam stumbladis. Jegorĉjo, eksentite tian atenton al sia rakonto, turniĝis en la selo per la vizaĝo al Demetrio, komencis paroli nur al li. Demĉjo demandis mallaŭte, tiel ke Jegorĉjo ne distingis:

— Kaj ĉu min oni prenos? Kun mia lameco?

— Kio, kio?

— Kun lameco, mi diras, ĉu prenos?

— Prenos! — certe respondis Jegorĉjo. — Kiel vin ne preni? Vi jen kiom navigadis, iu alia en la tuta vivo tiom ne vidos, kiom vi devis vidi en juneco. Jen kiom da jaroj vi navigis, kaj eĉ kie! Gwyn kaj Grace, kaj ankoraŭ Farquharson — ĉiuj kune tion ne vidis, kion vi sola devis.

Rjabov subridis, metis la manon sur la ŝultron de Demĉjo:

— Tio estas vero, Jegorĉjo. Multon li vidis. Kaj bona li estos maristo, kaj mi ja vane laŭdi ne estis instruita.

Demĉjo eĉ paliĝis pro la laŭdo.

— Kaj ke vi estas lama, tio, fraĉjo, por ŝipestro ne estas manko. Sur mastoj vi ne grimpos, sed neniu vin pelos. La ŝipoj, jen Jegorĉjo diras, estas konstruitaj, ankoraŭ konstrui la caro intencas, kiu do estu ŝipestroj? Do vi estos de la rusia ŝipa floto oficiro. Ĉu tiel mi diras, Jegoro?

— Tiel, oĉjo Ivano Sabateiĉ, tiel. Kaj Silvestro Petroviĉ Metrion ne forlasos, kaj li nun ĉe ni estas kapitan-komodoro, — ne ŝerco. Al mi li promesis, kiam ni la svedon venkos, al Moskvo sendi, jen kun Metrio ni kune veturos.

Kun la konversacio ili bonorde preteris la barieron, Jegorĉjo adiaŭis, ekveturis al la pramo — ĝojigi Silvestron Petroviĉ-on per sciigo, ke Rjabov estas viva kaj sana.

— Li ĉe mi hodiaŭ vespere estu! — postkriis Rjabov al li. — Ni ripozos iomete, konversacios, mi esperas, ne enuos li... Kaj ankaŭ vi venu.

Jegorĉjo svingis el malproksime la trikornan ĉapelon.

La maristoj ekiris pluen, al la urbo, al la hejmo. Estis varmege, polve, trans Dvino nemalproksime estis brulantaj arbaroj, odoris je fumo. Rjabov vokis Demĉjon, diris penseme:

— Mi jen iras kaj pensas: ĉu estis tia fojo, ke ni el la maro revenis kaj malfeliĉon sur la bordo ne atendis?

Demĉjo respondis ne tuj:

— Ŝajnas, ne estis.

— Jen, vere, ŝajnas...

La rudristo subridis malgaje:

— Pro kio tiel?

— Kontraŭ Dio ni pekis, tial malbonas al ni! — diris Demĉjo. — Pro niaj pekoj! Se ni preĝus...

— Ĉu vi malmulte preĝas? Sur Grumanto vi mortus kun viaj preĝoj, estas bone, ke mi peladis vin al ĉiuj aferoj, preĝulo. Ne, frato, ne pekaj ni estas antaŭ via Dio, ne tiu estas malfeliĉo, ke ni malmulte preĝas, alia estas malfeliĉo...

Li ne findiris, enpensiĝis, paŝante per sia fiksa marista irmaniero. Sur holmeto li haltis: el ĉi tie estis videbla Arĥangelsko, kurbaj, kurantaj al Dvino stratetoj, bulboj de lignaj kaj ŝtonaj preĝejoj, la kirko, la Fremdula korto, la Pulva, la Koĉera, la Kanona antaŭurboj, la domo de la vojevodo, la ŝipkonstruejo kun konstruataj en ĝi ŝipoj.

— Rigardu do, — diris la rudristo al Demĉjo. — Ĉu vi vidas ŝipojn? Multajn, mi pensas, oni konstruis sen ni! Floto... Nu, gratulon al ni pri la reveno, Metrio! Kiel ni vivos nun en nia urbo, en Arĥangelsko...

5. Estos malfeliĉo!

Meĥonoŝin revenis al la skansoj kolera kaj deziris tuj fali dormi, sed eksciis, ke dum lia foresto Pustovojtov lasis iri hejmen ŝipanojn, homojn el Grumanto. La leŭtenanto ekskoldis siajn dragonojn: kiel ili arogis ne ŝlosi la latronojn. La dragonoj almontris la dogansoldatojn, kaj la doganistoj diris, ke tiel ordonis Pustovojtov. La leŭtenanto, ardiĝante, batis la kaporalon per la pugno, la skribiston per la piedo — kun tia forto, ke tiu falis. La dragonoj rakontis al sia komandanto, ke la gardo vidis: la barko iris unuafoje peze ŝarĝita, kaj duan fojon tute sen ŝarĝo. Meĥonoŝin ordonis seli por si ĉevalon. Oni selis, kvazaŭ intence, longe. Meĥonoŝin ĝissange batis la vizaĝon de la ĉevalisto kaj forrajdis en la urbon.

La vojevodo ĵus venis el Ĥolmogoro kaj estis dormanta, la dumaano same forestis — li ankoraŭ ne revenis de Onego, kie kun soldatoj li estis elbatanta nepagitajn ŝuldojn. Meĥonoŝin devis pro urĝeco rakonti la aferon al kancelariano Molokojedov. Ties okuloj ekbrulis, li ekparolis afable, per bonkora, miela voĉo:

— Aĥ, latronoj, aĥ, kion ili faras, certe, ili svedajn militistojn kaŝe alveturigis, aĥ, aĥ, aspidoj...

Meĥonoŝin respondis kun kolero:

— Kion vi elpensas! Militistojn! Ne militistojn, sed felojn riĉajn, fiŝan denton, balenan oston — jen kion ili alveturigis. Necesas kun saĝo fari — ili mem diros, kie kaŝis.

Molokojedov enpensiĝis:

— Kun saĝo! Se sur pendigilon levi, do necesas raporton skribi. Kaj en raporto kio estos dirita, tio estos eldonita. Ĉu

multo por ni restos?

Kaj li ekflustris:

— Princo Aleksio Petroviĉ ĉion en siajn tenejojn metos. Ĉi tie pensi necesas, karulo, forte pensi. Eble, tiel: la princo-vojevodo dum torturado nepre laciĝos, foriros, — tiam ni la latronojn paroligos. Ili tuj kion necesas rakontos, kaj ni rapide al la loko iros. La aĵojn ni prenos, sed ion lasos, ion, ĉu vi komprenis, karulo? Se la barko estas trimasta — por mara irado, — tie estas multe da varo. Sufiĉos por vi kaj mi...

— Sed kiu ilin prenu, la latronojn? — demandis Meĥonoŝin.

— Vi, karulo, vi. Vi ilin kun viaj dragonoj perdis, kaj vi ilin kaptu, laŭ la cara ukazo. Sed ne hastu, ripozu post la vojo, kaj poste, matene, konduku. Ili dume promenu, kaj por ni tio estas profita. La bojaro vojevodo ja intencas morgaŭ al la citadelo veturi, ni dume la tutan aferon aranĝos.

Meĥonoŝin leviĝis, eliris, eksidis en la Magrula drinkejo sur benkon, ordonis porti al si vodkon kaj manĝon. Magrulo alportis gadon stufitan kun fungoj, duonstofon da gdanska vodko, diris impertinente, ke li plu atendas, kiam sinjoro leŭtenanto ricevos el la bieno monon kaj kvitiĝos kun li, malriĉa tavernisto. Kaj ankaŭ multaj en la urbo atendas: tajloro Lebedincev, kiu faris al sinjoro leŭtenanto uniformon, lombardisto Susekov, kiu donis al sinjoro leŭtenanto monon kontraŭ garantiaĵo, armilfaristo Ŝiŝkin, kiu pruntedone faris paron da pistoloj.

La leŭtenanto verŝis al si vodkon, eltrinkis per malgrandaj glutoj, ne almanĝante, poste diris:

— Antaŭ nelonge mi ricevis epistolon...

Magrulo silentis.

— El la bieno monon atendi mi nun ne povas.

— Kial tio? — maltrankviliĝis Magrulo.

— Tial, ke ne plu mi havas bienon. Bruligis ĝin kampuloj...

— Bruli-igis?

Meĥonoŝin kunpremis la pugnon, batis kun tondro al la tablo, montris la dentojn, kriis por la tuta drinkejo:

— Bojarojn bruligi? Haŭton de vivaj mi deŝiros, sur fajro infanojn bakos vivajn, vilaĝojn al la tero alniveligos...

Magrulo timidiĝis, depaŝis al la muro, foriris kankre, riverencante al la larĝa dorso de la leŭtenanto. Laborantoj, drinkantaj en la drinkejo, kvietiĝis, interpalpebrumante. Meĥonoŝin ŝanceliĝis, ekiris per oblikvaj paŝoj al la pordo, sed maldecidis kaj ree eksidis al la tablo. Li drinkis sola kaj nenion manĝis, flustrante longajn insultojn. Liaj okuloj ĉiam pli malheliĝadis, poste li dormis dum horo, poste refreŝiĝis per drinko...

6. Saluton, rudristo!

En la korto la knabo, tondita bovle, kun rozkolora vizaĝo, fortika kaj sana, levis al la rudristo la verdajn okulojn kun fajreroj. Rjabov aliris pli proksime, deziris levi la filon sur la manojn. Tiu ne permesis, diris severe:

— Kion vi? Ĉu ne vidas — muelejon mi instalas?

— Bona muelejo. Ĉu vi mem konstruis?

Ivaĉjo ne respondis: spiregante, starante kvarpiede, kiel ursido, li blovis al la aloj, por ke ili turniĝu. Rjabov konsilis:

— Vi la alojn klinu, alie ili ne turniĝos.

La knabo klinis la alojn, ili ekturniĝis. La rudristo eksidis sur trabon, etendis la lacajn krurojn, pririgardis la korton, la sorpujojn, la fortikan, konstruitan de Antipo barilon, la domon. Ĉi tien, trans tiun ĉi barilpordeton eliradis al li Taisja. Laŭ tiuj ĉi ŝtupoj enkuradis li antaŭ multaj jaroj kun la birdo, ĝis sango gratvundinta liajn manojn...

— Panjo do kie estas?

— Foriris.

— Kien foriris?

— Tolojn ŝi faris kaj foriris. En la preĝejon, aŭ ien ankoraŭ...

— Kaj paĉjo via kie estas?

— En la maro dronis — jen kie! — respondis Ivaĉjo.

La rudristo subridis, tiris la filon je la ĉemizeto.

— Ne dronis mi, infaneto. Venis. Eliris el la maro.

La knabo ĵetis la muelilon, turniĝis al la patro, larĝiginte la okulojn, demandis mallaŭte:

— Ĉu vi ne mensogas?

Rjabov ne retenis sin: lia krudiĝinta pro vento vizaĝo tremeris, el la okuloj ekrampis larmoj. La knabo alpremis al la brusto la pugnetojn, kriis:

— Patro, paĉjo!..

Rjabov jam ne ploris, la larmoj malaperis en la barbo. Li brakumadis la knabon, demandadis haste, flustre:

— Ĉu vi ambaŭ suferis? Malbone vivis? Ĉu panon vi havis?

Ĉu vi mem sata estas, infaneto? Kia estas la panjo? Ĉu estas gaja? Aŭ ploras? Atendu, frato, malpurigis mi vin per miaj manegoj. Nu, sidiĝu al mi, sidiĝu, ni parolos... Aŭ la banejon ni iru hejti. Ni iros la banejon hejti, kaj vi al mi rakontos. Ĉu bone? Laviĝi mi bezonas, kiom da jaroj mi bonan banejon ne vidis...

Duope ili hejtis la banejon. Rjabov, tenante la filon je la mano, eniris en la ĉambron, sur la sojlo haltis, longe rigardis al la vidvina loĝejo: ĉio estis pura, la planko estis skrappurigita, sur la benkoj estis broditaj per herboj kovriloj, sur la tablo estis farbita tablotuko, herboj — post ikonoj, sur la muro; en ĉizita el osto kadreto — la folio, gratifikita de caro Ivano la Terura, trilas-kantas birdoj en kaĝoj...

Ivaĉjo forŝiris sin, levis pezan kovrilon sur la kofro, ruĝiĝinte pro fortostreĉo, kriis:

— Ĉi tie, paĉjo, estas ĉio via. Kaftano festa, kamizolo, zono. Panjo diris: kiam vi elkreskos granda, edziĝos — mi fordonos. Sed mi ne edziĝos...

— Pro kio tiel?

— Iru ili for, inoj! Mi en la maron iros — kaj ili ploros!

La rudristo, ridetante, elprenis el la kofro la kaftanon, metis sur la benkon, poste elprenis skulptitan el osto figureton: fiŝisto en tempesto kondukas transverse de la ondo sian malfortikan boaton. Li balancis la kapon, diveninte, kiu skulptis, metis sur la tablon, demandis:

— Krikov, kaporalo, ĉu estadas ĉe vi?

— Kapitano li nun estas! — gravmiene diris Ivaĉjo. — Spadon havas jen kian! Kaj estadas li preskaŭ ĉiam...

— Jen, kapitano!.. Nu bone, ni iru, frato, ŝvitiĝi en la banejo...

Ili ŝvitbanis sin duope — sidis sur la kuŝbreto kaj ŝprucigadis unu al la alia malvarman akvon. Poste ili luktis, poste la filo renversis sur la patron tutan kuvon da malvarmega akvo, poste ili vergis unu la alian per varmegaj folifaskoj, poste sidis kviete. Rjabov komencis rakonti, kiel ili vintris sur Grumanto. Ivaĉjo okulumis, tenis la patron je la mano per ambaŭ manetoj — timis la rakonton. En silento kraketadis la ŝtona forno, gutadis akvo.

— Ĉu timige estis? — demandis Ivaĉjo.

— Enue, precipe, kaj timige — pro kio? Enue — tio estas vero. Kaj pensoj pensiĝas, — kontraŭ ili nenio eltenos, nenia forto.

— Kiaj pensoj?

— Diversaj, infaneto.

— Kiaj diversaj?

— Nu, pri vi, ekzemple. Ke ekzistas ĉe mi filo. Kaj mi pensas, kiel tiu filo en la mondo vivas? Kia al li sorto estos? Orfo li estas kun viva patro. Kaj la panjon mi kompatas: kun mi ŝi suferis, kaj nun sen mi ŝi entute turmentiĝas...

— Kial do vi hejmen ne iris?

— Ja tial ne iris, ke nian ŝipon malicaj homoj forkondukis.

— Ĉu vi mensogas? Kiel — forkondukis?

— Forkondukis, infaneto. Venis fremdlandaj hundoj, kverelis inter si, sian ŝipon dronigis — glacioj al ili la ŝipon frakasis, ses siajn homojn ili murdis, kaj tri restis. Ni ĉion ĉi ne

sciis, akceptis ilin kiel bonajn gastojn, akceptis laŭ la rusa kutimo...

— Kiel?

— Nu, sciate, laŭ la moro. En Rusujo oni ne demandas — kies, kaj de kie, sed vokas — eksidu tagmanĝi, kio estas en la forno — ĉion sur la tablon...

— Tiel ankaŭ panjo instruas! — diris Ivaĉjo.

— Jen, frato, instruas, sed gastoj estas diversaj. Estas tiaj, ke tute ne taŭgas. Al Grumanto ni delonge iradas... Estas tie unu viro — Starostin. Tiu entute tie kutimiĝis, de siaj praavoj mem enradikiĝis, pli sur Grumanto loĝas, ol ĉi tie... Kun tiu Starostin ni ĉasadis...

— Ĉu beston?

— Beston, infano. Kaj multe ni ĉasakiris. Kaj la fremduloj, kiam ekvidis niajn felojn, kiujn ni akumulis, tiam tio al ili batis, evidente, en la kapojn. Antaŭ nokto ili murdis unu nian, alian ligis per rimenoj, kaj la ceteraj kaj mi kun ili estis en ĉaso. Ili forkondukis niajn ŝipojn, sed ne fortunis al ili — dronis. Kaj la ŝipojn ŝtelis kaj ĉion, kion ni akiris... Nu, venis malfeliĉo. Kion fari? Pensis ni, pensis...

— Ĉu elpensis?

— Elpensis barkon fari. Dum ni faradis, ses virojn ni enterigis. Tiom malfacilajn turmentojn ni travivis — ne eblas rakonti. El maraj arbotrunkoj ŝipon kunigi por mara irado, kaj krom hakilon, ni nenion havis. Ĉu estas facile? Do per nenio finiĝis niaj penoj. Kislov venis sur la trimasta barko, helpis eliri... Nu, kial pri tio rememori. Ni, frato, priverŝu nin — kaj en la ĉambron. Dormi al vi tempas.

Post la bano, langvoriĝinte, ili eliris en la korton, eksidis sur la peronon trinki kvason. Ivaĉjo alpremiĝis al la patro, rigardis al li demalsupre supren. Rjabov penseme glatumadis la malsekajn harojn de la filo, ne deŝiradis rigardon de la barilpordeto.

Vesperiĝis. Trans Dvino bruis, estis venanta fulmotondro. Ĉe la perono interflustradis la sorpujoj. Jen oni sonoris por vespro... Ivaĉjo ekdormetis, alpremiĝinte al la patro, kaj ne vekiĝis, kiam ekknaris la barilpordeto. La rudristo sidis senmove, kvazaŭ ŝtoniĝis.

La unua en la korton eniris avino Eŭdoĥa, ne rekonis, riverencis al la fremda gasto. Post ŝi aperis Taisja, same riverencis, poste fiksrigardis, paŝis antaŭen, ree haltis, flustre demandis:

— Ĉu vi?

Li silentis.

— Ĉu viva?

— Viva! — apenaŭ aŭdeble respondis Rjabov.

— Revenis?

— Revenis.

Taisja aliris ankoraŭ pli proksime, diris per fremda voĉo:

— Avino, ĉu vi ne vidas, kiu al ni venis?

Avino Eŭdoĥa ekploris, eklamentis, ĵetiĝis al Rjabov, poste kaptis sian kapon, kuris hejti la fornon, meti pirogojn. Rjabov levis Ivaĉjon sur la manojn, ekportis en la ĉambron. Malantaŭe, ŝanceliĝante, kvazaŭ ebria, kun freneza rideto sur palaj, tremantaj lipoj, apogante sin al la muroj, iris Taisja. La rudristo

metis Ivaĉjon sur la benkon, returniĝis. Avino Eŭdoĥa trans la muro faligadis sur la plankon argilajn potojn, ekkriadis:

— Oj, por bono, oj, por ĝojo...

Taisja kun fermitaj okuloj senmove staris ĉe la porda fosto.

— Ĉu vi atendis? — demandis Rjabov.

— Vi mem scias, — ne malfermante la okulojn, flustris ŝi.

— Vidu, kaj mi revenis. Skoldis vi min, mi pensas...

Ŝi malforte ridetis:

— Mi mem por mi tian elektis!

— Kaj ĝis la nuna tago vi min amas?

— Kaj ĝis la nuna tago mi vin amas! — malfermante siajn grandegajn okulojn, same mallaŭte diris Taisja. — Kaj ĝis hodiaŭ, kaj hieraŭ, kaj morgaŭ, kaj nun, kaj ĝis la morto mem. Saluton, edzo!

— Saluton, edzino! — respondis la rudristo kaj metis siajn pezajn manojn sur ŝiajn ŝultrojn. — Saluton!

Ĝis la vespero la domo iĝis plena de homoj: sciigo pri la veno de la malaperintoj ĉirkaŭflugis la tutan urbon. Rjabov, en malbutonita sur la brusto pura tola ĉemizo, sidis en la honora loko. Vidvinoj kaj patrinoj de la pereintaj sur Grumanto maristoj kaj ĉasistoj alverŝadis al li brandon; viŝante larmojn, ili aŭskultadis funebran rakonton de la rudristo pri la lastaj tagoj de iliaj edzoj kaj filoj. Rjabov parolis malrapide, nenion kaŝis, nenion beligis. Poste li transiris al la afero...

— Edzoj viaj kaj filoj, dum vivaj estis, kun tuta diligento penis ĉasi pli bone, por ke kaj al la monaĥejo estu kaj por sia

malriĉeco helpo. Kion ili ĉasakiris — ĉio estas konservita. Sukcenon ni kolektadis, multe kolektis, — ĝi same estas konservita. En malproksima vintrejo, pro kio mi ne scias, trovis ni monon de ĉasistoj, kiuj mortis ĉiuj pro skorbuto. Da tiu mono estas mil rubloj kaj ankoraŭ dudek tri. Decidis ni kun rudristo Kislov: la mono estas vidvina. Da vi, vidvinoj kaj patrinoj, estas dek ses. Tiujn talerojn, kaj rublojn, kaj nemalmultan arĝenton ni egale inter vi dividos... Dume ni en kvieta loko ĉion kaŝis, por ke la estraj homoj ne forprenu. Al la monaĥejo ni ne donos eĉ moneron. Sufiĉas! Ĉu multe patro ekonomo pri ni rememoradis, kiam ni tie suferis? Ĉu farunon, grion, fiŝon almenaŭ foje li donis al vi ĉi tie?

— Per bastonoj ordonis peli nin! — diris vidvino de Kustov.

Aliaj ekparolis ĉiuj kune:

— Al la pordegisto li ordonis neniun el ni enlasi!

— Ne nur farunon — eĉ fiŝon ili ne donis...

— Dum la sankta Pasko, eĉ tiam ili nin forpelis...

— Preĝu, diris...

— Do jen! — diris Rjabov. — Kion ni ĉasakiris — ĉio estas via!

Li ekstaris de sia loko, malalte, ĝis la planko, riverencis, petis laŭ la moro pardonon pro tio, ke li mem revenis hejmen viva, sed multajn amikojn enterigis sur Grumanto. La gastoj silentis, estiĝis tia sensoneco, ke iĝis aŭdeble, kiel krias grilo sub la forno. Maljunulino Ŝĉapova Pelagia Petrovna — patrino de du filoj, enterigitaj sur Malgranda Beruno, sur la senhoma malvarma insulo, — faris al la rudristo riverencon; plorante kviete, ŝi trifoje kisis al la frunto, diris nelaŭte:

— Bone vi faris, Ivano Sabateiĉ. En la rusa maniero! Dankon, rudristo!

Unu post alia aliradis vidvinoj kaj patrinoj, kisadis Rjabovon al la frunto, riverencadis. Li same riverencadis al ili, de ĉiu petadis pardonon. La okuloj de la rudristo rigardis rekte, klare, nur inter la brovoj kuŝis funebra sulko. Lia konscienco estis pura.

Poste ili drinkis por rememoro de la mortintaj maristoj — Elizeo Anoĥin, Bazilo Ogurcov, de Ĥaradrio-adoleskulo Simono, de du fratoj Ŝĉapov-oj — Elio kun Nikolao, manĝis nesalitajn funebrajn pirogojn, kantis malnovan plorkanton:

Ni atendos longe, atendados,
En la vasta kampo, en libera,
Ni direktos do okulojn niajn
Fore-fore al ĉiuj flankoj...
Ni rigardos kaj atendos ĉiam,
Ĉu ne venos niaj falkoj bravaj,
Belaj, krispaj, kiel arboj pomaj,
Laŭ malnova kutim', laŭ la moro,
Por laboro peza, por kampula.
Ni eterne do atendos ilin ĉiam...

Ankoraŭ ili ne finkantis la kanton, kiam venis novaj gastoj: kapitan-komodoro Ievlev kun Maria Nikitiŝna, Jegorĉjo kaj Ĥagajo Pustovojtov-oj, malnova amiko rudristo, nun ferdekestro, Semisadov. Aspekton Silvestro Petroviĉ havis lacan, nun li estis apoganta sin al bastono, sed la rudristo per la unua rigardo komprenis: nun Silvestro Petroviĉ estas tute alia homo, ol tiam, — vera oficiro kaj komandanto.

— Nu, saluton, rudristo! — diris la kapitan-komodoro. —

Saluton, Ivano Sabateiĉ! Jen kia vi estas homo! Ree viva!

— Viva! — proksime alirante Ievlev-on, ridante respondis Rjabov. — Homoj ne kredas, sed mi plu estas viva. Unu maljunulineto hodiaŭ per la mano tuŝis: ĉu vi? Mi, je Dio mi...

Ili brakumiĝis, trifoje, laŭ la moro, kisiĝis. De la rudristo iris gaja odoro de banejo, de menta kvaso, li estis pli alta ol Silvestro Petroviĉ preskaŭ je kapo. Ievlev, admire pririgardinte la rudriston, diris:

— Kiel malavara estas al vi Dio, Ivano Sabateiĉ! Per nenio li vin ofendis.

— Jes, li ja estas tia ĉe ni, — same admirante Rjabov-on, prononcis Semisadov. — Nenio lin venkas! Al mi la kruron kuglego plene deŝiris, sed de li tiu kuglego desaltus! Ĉu vere, Ivano Sabateiĉ?

— Ja kio! — brakumante Semisadov-on, respondis Rjabov. — Kaj desaltus. Sed atendu, ferdekestro! Vi ankaŭ sur la ligna kruro firme staras! Vi same estas viro taŭga...

Taisja kun riverenco ĉirkaŭportis al la malfrue venintoj brandon, aliris al Manjo, riverencis:

— Drinku je mia plej feliĉa tago, Maria Nikitiŝna, lipu!

Manjo, ĵetinte rigardon al Taisja, kiu vere radiis ĝojon, prenis la glason, lipis, firme kunpremis la fingrojn al Taisja, demandis flustre:

— Vi ĝisatendis, ĉu? Kaj ke ni ĉiam ĝisatendu? Ke revenadu ili ĉiam el kie ajn?

Taisja respondis same flustre:

— Ke ni mortu kune kun ili! Ke ne estu por ni alia sorto! Se

jam venos la tempo — tiam kune, ne dise! Drinku, Maria Nikitiŝna, drinku, Manjo, ĝis la fino, via vorto estas sankta, ĝuste tiel estos, kiel vi nun deziris! Se vi ne drinkos...

Ektiminte, Manjo eltrinkis la tutan glason. Tuj iĝis varmege, gaje, ŝi mallaŭte petis:

— Portu al Silvestro Petroviĉ, li vorton diru!

Taisja aliris kun la pleto al Ievlev, riverencis, feliĉe kaj aŭdace rigardante en liajn okulojn, diris:

— Vi la glason drinkos, Silvestro Petroviĉ, do vi ankaŭ la ĉetablan vorton diru!

Ievlev ridetis, infektiĝante de la ĝojo de Taisja, prenis la pezan glason de la pleto, diris, pririgardante la tablon per helaj, larĝe malfermitaj bluaj okuloj:

— Delonge, amikoj bonaj, ne drinkis mi, ĉiam mankis tempo, kaj mankis je kio drinki. Sed nun mi devos: drinkos mi ĉi glason je la rusiaj plej gloraj maristoj, kiuj por nia floto ŝipa estas fundamento. Ŝipoj ankoraŭ ne estas floto, floto estas maristoj. En antaŭ longe pasintaj jaroj estis mi ĉi tie, en Onego, mallonge, ion komprenis. Poste kelkajn veraĵojn komprenis mi ĉi tie, en Arĥangelsko. Kaj mi diros senkaŝe: Rjabov Ivano Sabateiĉ kaj multaj liaj amikoj unuafoje malfermis miajn okulojn al tio, kio estas maraj kaj navigistaj artoj, kio estas marvojaĝado. Nun la tuta Arĥangelsko, de infanoj ĝis maljunuloj, parolas pri la sola afero — pri la navigado de rudristo Rjabov al Grumanto kaj pri ĉio, kion ĉi kuraĝa faranto travivi devis. Hodiaŭ, esperas mi, multon aŭdos ni de li mem, pri vivo lia dum ĉi jaroj, pri la kuraĝo, pri tio, kiel savis li multajn homajn vivojn kaj mem al ni viva kaj sana revenis. Ni

aŭskultos, kaj post paso de jaroj, eble, infanoj niaj eĉ legos ĉi historion, eldonitan libre, ĉar en Rusujo estos Akademio de sciencoj, kaj tiu Akademio ion pli bonan, ol verajn eventojn, kiujn rusianoj partoprenis, eĉ ne bezonas...

Silvestro Petroviĉ ekrigardis al Rjabov, pli alte levis la glason:

— Do drinku ni je Ivano Sabateiĉ kaj por kunuloj liaj — rusiaj maristoj, kiuj senekzemplajn faris en sia vojo heroaĵojn kaj en nemalproksima estonteco eĉ pli grandajn miraklojn faros por miro kaj timo de malamikoj kaj enviantoj de patrino nia — sankta Rusujo!

Ne sulkiĝinte, unuglute eltrinkis li sian brandon, post li eltrinkis Rjabov, post la rudristo — Demĉjo, sed al li ne sufiĉis forto, li ektusis. El ĉie oni kriis kun rido:

— Panmolon, panmolon al li sekalan!

— Ne timu, Metrio, alian glason altrinku!

— Al la dorso lin, fraĉjoj, al la dorso batu!

Rjabov donis al Demĉjo kvason, ruĝega pro la sinĝeno Demĉjo finfine restarigis la spiradon. Semisadov diris al Ievlev:

— Jen, sinjoro kapitan-komodoro, aŭdis Metrio pri la navigista lernejo...

Demĉjo kaptis la ferdekestron je la kubuto, ekflustris — ne necesas, ĉesu, oĉjo. Semisadov ekparolis pli laŭte:

— Eble, ankaŭ Metrio nia, kampulo-gadmanĝanto, taŭgos por tiu lernejo?

Silvestro Petroviĉ respondis firme:

— Pensas mi, ke taŭgos. Li estas maristo vera, aliaj dum longa vivo ĝis maljuneco tiom ne vojaĝos, kiom Demĉjo dum siaj jaroj. Ni parolos kun tempo. Eble, kun Jegoro kune ili direktos sin al Moskvo, sed tamen ne nun, dume ne havas ni tempon...

Rjabov komencis rakonti iom post iom, ne laŭ ordo:

— Jen mi hodiaŭ mem ridas, sed tiam ne ridis, ne. Tiam ne ridinde estis. Da pulvo ja estis nur dek ses ŝargoj entute, kaj vivi kiom estis destinite? Eble, en malfeliĉo ni finos niajn vivojn? Ne, ĉi tie estas afero komplika, pensi necesas... Iradis mi, rigardadis. Trovis sur bordo tabulon kun najloj — fluo alportis, ankoraŭ hoko en la tabulo estis fera. Diras mi: viroj, ni konstruu forĝejon. Sed viroj miaj — iuj en angoro dronas, iuj plie preĝas... Devis mi, peko mia, bastonon en la manon preni: tiu, kiu preĝi komencis en tia afero, Silvestro Petroviĉ, estas preta mortonto...

Ievlev ekridis, Rjabov kun seriozeco konfirmis:

— Jen al vi rido. Kiu preĝas — tiun skorbuto tuj je la gorĝo prenas kaj faligas. Vi ne scias, kia ĝi estas, sed ĝi estas maljunulino ĝiba, straba, grandnaza, dikventra, veruka kaj furunka.

— Kiu? — ridante, demandis Ievlev.

— Ja la skorbuto! La plej aĝa filino de reĝo Herodo. Ŝi havas dek unu fratinojn, unu de alia pli serpentaspektajn.

La rudristo pro abomeno kraĉis...

— Dek du estas da ili ĉiuj, kaj kiom ili estas ruzaj: kiam la niaj komencas preĝi aŭ dormi — unuvorte, laboron forlasas, — la skorbutoj-fratinoj tuj ekagas. Jen, ekzemple, mi estas edzo;

do mi, certe, songas edzinon. Tiam mi dormi deziras pli multe, por pli multe kun ŝi mian tempon pasigi. Tio estas ilia faro, de la Herodaj filinoj. Ĉio estas intence farata. Ili min, malicaj sorĉistinoj, per la edzino delogas, mi dormas, kaj la skorbuto mian korpon kaj rompas, kaj hakas, kaj putrigas. Jen preĝulo — li klinas aŭ krucosignas sin, kaj antaŭ li la Herodaj filinoj en maskoj dancas, logas, vokas; unu stultulo tiel preĝis, ke post ili el la vintrejo foriris, kaj en rokoj frostmortis. La fingroj kunmetitaj por krucosigno, kaj li mem al la knabinoj rigardas, — jen, kion ili faras... En tio, Silvestro Petroviĉ, mi al vi diros, la unua afero estas — laboro. Por ke estu nek dormanto, nek preĝanto, nek pensanto. Mi ĉiam al ili tiel diradis: hejmen ni revenos — tie la pekojn elpreĝos, tie ni satdormos, tie pensojn ĉiujn pensos. Sed ĉi tie, amikoj miaj malfeliĉaj, niajn vivojn necesas konservi...

— Ĉu vi batis ilin? — demandis Ievlev scivole.

— Okazis. Trovis mi bastonegon... Iam batadis...

— Ĉu ili ofendiĝadis? — demandis Manjo.

— Kia kontraŭ mi ofendiĝo povas esti? Por ilia ja utilo!

— Mi ofendiĝus... — diris Silvestro Petroviĉ.

— Vi estas sinjoro, en vi orgojlo ludas, sed ni estas homoj simplaj, kun saĝo vivas.

— Sufiĉas pri la Herodaj filinoj! — diris Semisadov. — Ĉio ĉi estas malgrava. Pri la forĝejo rakontu, kiel vi forĝejon konstruis!

— Ne malgrava pri la filinoj! — diris Rjabov. — Vi sur Grumanto mem estadis, kiel do malgrava? Kiu al la Nova Tero iradis aŭ al Grumanto, tiu scias. Malgrava! Jen kia vi rapida!

Li plenigis la pipon, forte enspiris, rememorante, balancis la kapon:

— Forĝejo! Estis nura malfeliĉo, sed ne forĝejo, tamen multan bonon ni de ĝi havis. Unue ni trovis du ŝtonojn, unu — amboso, la dua — martelo. Per tiu martelo ni forĝis el hoko bonan martelon. Dum naŭ tagoj ni forĝadis, ĉiujn manojn ĝis sango disbatis, sed faris. Kaj ekde tiu tago komenciĝis nia saviĝo: se ne havus ni martelon, pereus ni ĉiuj tute...

Silente, penseme aŭskultis Ievlev la rakontojn de la rudristo, imagadis la malaltan, fetorantan je rosmara kaj foka graso, fuman kaj malvarman domon, senfinajn nigrajn, malicajn polusajn noktojn. Jen en flagranta lumo de arkta aŭroro surgrimpis la malaltan tegmenton de la domo blanka urso, montrante la dentojn, disfosas per la fortaj manegoj mizerajn putrintajn stangojn, enspiras frandan odoron de vivaj estaĵoj, kaj la homoj malsupre rigidiĝis. Meze de la disfalanta domo, larĝe dismetinte la piedojn, kun lanco en la fortikaj manoj staras Rjabov — atendas; sen mistrafo devas bati lia lanco en la koron de la grandega forta urso. Kaj la lanco estas ligna, rompebla, kaj ties pinto estas forĝita el najlo. Ĉu povas homo venki beston per tia armilo?

— Nun ĝi estas ridinda, — kun rido estis diranta Rjabov, — sed tiam ni ne tro ridis! Ne, tiam, gastoj karaj, ni dentoklakis. Rompos ĝi, mi pensis, la trusojn, falos ĝi oblikve, miskalkulos mi, — nu kaj adiaŭ, Ivano Sabateiĉ, vane vi penis...

— Ĉu mortigis? — demandis, rigidiĝante, Manjo.

— Mortigis. Grandega estis la urso; ni ĝin manĝadis, manĝadis, — ne sukcesis finmanĝi, putriĝis ĝi ĝis printempo.

— Ĉu en la koron vi ĝin batis? — interesiĝis Semisadov.

— En la koron. Mi batis, sed ĝi plu al mi iras. Faligis mi ĝin sub min, kaj ĝi jam estis morta. Ursino estis.

Rjabov ekridis, rememorante, kaj Silvestro Petroviĉ pense ripetis liajn vortojn — «faligis ĝin sub min, kaj ĝi jam estis morta!» — kaj pensis: «Jen kiu iru al la sveda eskadro. Jen li, prodo. Li mortigos la beston, kiom ajn terura ĝi estu, li en la koron batos!»

Taisja tiutempe kliniĝis al la edzo, metis en lian bovlon frititan fiŝon, pirogon. Rjabov retrorigardis al ŝi — ŝi estis ridetanta al li ĉe lia vizaĝo mem. Silvestro Petroviĉ mallevis la kapon, por ne vidi: ree forprenos li de Taisja la edzon, ree restos ŝi sola en sia domo, kaj ne plu estos ĉi tie feliĉo, venos vidvina tempo...

— Ŝercas oni ĉe ni, — kvazaŭ el malproksime estis diranta la rudristo, — ridas tiele: ne bedaŭru, belulino, ke al mi edziniĝis, vivante kun mi vi ne ridetos. Pri Grumanto oni tiele diradis, sed — ne. Okazadis — tian gajon ni faradis, ridon, dancon! Kaj sen brando, sed ĝi ne necesis. Ni mem pri nia embaraso, pri nia malfeliĉo ridas. Ĉio okazadis... Ankoraŭ nodojn ni ligadis.

— Kiajn nodojn? — demandis kun intereso Manjo.

— Ĉe ni tie, vidu, kia afero estas, — diris Rjabov. — Dormo. Ĝi, Maria Nikitiŝna, estas la plej terura. Ĝi kaj skorbuto apude loĝas. Kaj kiam vi ekskorbutis — la Herodaj filinoj tuj atakas. Do, dormo estas la plej granda malbono. Sed kion en la vintra nokto vi faros? Alfabeton ni ne scias, librojn ne havas, kion ni sciis, ĉion rakontis. Tiam ordonu — ligu,

knaboj, nodojn. Kaj taskon al li, malfeliĉulo, donu. Tiun ĉi, diru, ŝnuron tutan per nodoj firme ligu, malsekigu, strecu pli forte, kaj poste — malligu. Aŭ felon bestan po hareto oni pluku. Ankoraŭ flikaĵojn sur peltjakon ni alkudradis, kaj reen dekudradis...

— Kaj la estro estis vi?

— Iam mi, sed iam ankoraŭ iu.

— Kaj oni obeadis?

— Kion do fari? Ni kune decidis, kune ankaŭ postulas...

Poste Rjabov rakontis, al ĉasado kiel ili iradis, al blanka kaj blua vulpo, kiel laŭ bordo ili ĉasadis rosmarojn, fokojn, beluĥojn, marleporojn, pri ĉiutaga vivo, kiel ili kudris, ĉar la vesto disfalis kaj necesis aŭ vesti sin denove, aŭ morti pro frosto. En memfaritaj trogoj ili kovradis per cindro kaj moligadis per akvo bestajn felojn, moliginte, deskrapadis per tranĉiloj lanon kaj el maldika kaj mola ledo tajlis por si ĉemizojn kaj pantalonojn. La tajlitaĵon ili kudradis per boacaj tendenoj. Ili kudradis ankoraŭ peltĉemizojn kaj peltmantelojn, peltbotojn, pugnogantojn...

— Longe, ĉu? — demandis Manjo.

— Ja tempo al ni ne mankis! — subridis Rjabov. — Lumilon ni ankaŭ konstruis por ni. Kranion ursan ni bolkuiris, per lardo plenigis, mecon — en la lardon, kaj ne malpli bone, eble, ol ĉi tie.

Li suspiris, svingis la kapon:

— Se prudente, ni riĉaj nun estus. Unu nia amiko tie trovis da rosmara dentego — mi ne mensogas — monton. Kio okazis

— mi ne scias, sed rosmaroj mem sur la bordon elĵetiĝis kaj mortis, kaj iliaj dentoj restis. Multege!.. Ni dum kelkaj tagoj portadis kaj kiel brulŝtipojn kunmetadis...

— Kien do tio malaperis? — demandis Manjo.

— Ni ja ne rekte, Maria Nikitiŝna, en Rusujon revenis. Ni ankoraŭ al la norvegoj iris. Kaj ili, kiel sciate, estas popolo afabla, kun riverenco — ruso estas brava, ruso tio, ruso ĉi tio. Kun regalo sur la ŝipon venas, kun riverenco. Ege ĝentilaj. Kaj ĉiam suveniron petas. Ion sennecesan donaci ne indas, digno ne permesas, kaj eburo — ĝi ja ankaŭ por donaco bonas. Nu kaj, certe, ankaŭ brando ilia en la kapo bruas...

— Vipi vin indus, diablojn, sed ne estas kiu vipus! — diris Ievlev.

— Certe! — konsentis Rjabov. — Sed aliflanke, Silvestro Petroviĉ, kion fari — donaci ja responde ĉu ne necesas? Sukcenon ni ankoraŭ havis...

— Kaj ĝin vi kien elspezis?

— Kial — elspezis? Kiu restis — ni alveturigis, al la vidvinoj morgaŭ disdonos.

— Kaj la vian?

Rjabov ekridis:

— Kion vi rememoris... Nian... Mi diras ja: la norvegoj estas popolo afabla...

Silvestro Petroviĉ rigardis al Rjabov kaj pensis: «Jes, ĝuste li iru. Li estu sur la sveda eskadro, li — faros, lin eblas fidi. Li estas rekta, kuraĝa, simpla en la animo, neprofitema! Li! Plu serĉi ne estas kiun kaj por nenio!»

— Nu, kial vi rigardas do, sinjoro kapitan-komodoro? — demandis Rjabov. — Mi parolas, kaj vi ĉiam rigardas al mi? Ne komprenas mi — ĉu vi riproĉas aŭ ridas? Ne riproĉu, min ankaŭ la edzino ne riproĉos, tia mi al la mondo naskiĝis...

Silvestro Petroviĉ silentis.

— Pri kio vi ĉiam pensas? — flustre demandis lin Manjo.

Ievlev ne respondis.

Ili parolis longe, ĝis triaj kokokrioj. Matene ili komencis riverenci al la mastrino, danki. Taisja Antipovna riverencis al la gastoj, mem dankis, ke ili vizitis, enuis, ne abomenis la regalon. Silvestro Petroviĉ, adiaŭante ŝin, kunpremis la dentojn: estis timinde pensi, ke li, ne iu alia, sed li, forprenos de ŝi ŝian rudriston. Kaj ŝi, kvazaŭ intence, malalte riverencis al la kapitan-komodoro, diris al Rjabov:

— Multe al mi Silvestro Petroviĉ helpis, Ivaĉjo, dum mi sen vi vidvinis. Tiom multe — ne eblas rakonti...

— Eble kun tempo ankaŭ mi estos utila! — ridetante, respondis la rudristo. — Ĉe ni en Blankmario oni bonon memoras...

La unuaj eliris eksteren la vidvinoj, ĉi tie, en la pordego, ili renkontiĝis kun leŭtenanto Meĥonoŝin, kiu estis kondukanta soldatojn-dragonojn en la domon de Rjabov.

— He, muzeloj, for de la vojo! — ordonis Meĥonoŝin.

— Mi montros al vi muzelojn, stultulo ŝminkita! — ofendiĝis maljunulino Ŝĉapova. — Vi mem estas muzelo! Ornamiĝis ĉiel — eĉ rigardi estas abomene. Muzeloj! Ni ja estas honestaj fiŝistaj vidvinoj... Kaj kien vi iraĉas — la gastoj

hejmen iras...

La leŭtenanto forpuŝis de la vojo Ŝĉapova-n, ŝi eĉ pli forte ofendiĝis, debatis per la fortika mano la trikornan ĉapelon de Meĥonoŝin, batis lin al la postaĵo.

— Tiklu lin, virinoj! — koleriĝis alia maljunulino. — Tiklu morte, li ŝrikos kaj fuĝos... Konas mi tiajn...

Sed Meĥonoŝin traŝiriĝis kun siaj dragonoj al la perono, per la piedo frapmalfermis la pordon en la ĉambron kaj tiam subite haltis senmove. Ĉe la kampulo-rudristo gastis kapitan-komodoro Ievlev mem. Al la krako de la pordo li turniĝis, trankvile demandis:

— Por kio vi venis, sinjoro leŭtenanto?

Meĥonoŝin elprenis el la kaftana maniko ukazon, skribitan de la kancelariano, diris kun plej ebla afableco:

— Ĉi maristoj rompis la ordonon de sinjoro vojevodo kaj ĉi tien venis el la tero de la norvegoj...

— Nu?

— Pro kio ili devas esti arestitaj de mi kaj kondukitaj...

— For! — per mallaŭta voĉo diris Ievlev.

— La ukazo estas noma, — pli rapide ekparolis Meĥonoŝin, — en ĉi ukazo estas skribite...

— For, sinjoro leŭtenanto Meĥonoŝin! Alie mi vian spadon forprenos kaj vin mem tuj ordonos sub gardo en la arestejon liveri. For! Kaj poste via piedo la sojlon de ĉi domo ne transpaŝu.

Meĥonoŝin, kvazaŭ ne komprenante, staris senmove.

Silvestro Petroviĉ laŭte, kiel sur ekzercoplaco, komandis al la dragonoj, amasiĝintaj en la vestiblo:

— Turniĝu posten! Levu la livan! Un', du, ek! En la kazernon!

La dragonoj ekbruis, turniĝante en la malvasta vestiblo, ektondris per la botoj, ektintis per la sabroj kaj bajonetoj. Meĥonoŝin, ĝibetiĝinte, ektrenis sin post la dragonoj. Ievlev ordonis al Ĥagajo Pustovojtov:

— Jen kio, amiko. Jam hodiaŭ donu al la rudristo taĉmenton da bonaj matrosoj, ili veturu al sia barko, kaj kion havas — sen prokrasto disdonu al la vidvinoj...

Li turniĝis al Rjabov kaj diris:

— Kaj vi, kiam la aferojn solvos, Ivano Sabateiĉ, vizitu min en la fortreso. Kaj Metrion vian kunprenu, kaj ankoraŭ kiun vi deziros, kaj Taisja-n Antipovna-n kun Ivano Ivanoviĉ.

Demĉjo alpremiĝis al la rudristo, per rigardo petis: «Ni veturu, Ivano Sabateiĉ!» Rjabov kapjesis — kial ne veturi, se oni vokas.

Silvestro Petroviĉ eliris sur la peronon, enspiris freŝan humidan matenan aeron:

— Paradiza ja somero, Ivano Sabateiĉ. Kvazaŭ ne estas nordo.

Kaj kriis al Manjo:

— Ĉu longe vi tie interflustrados? Tempas jam ĉesi. Tago venis...

Manjo atingis la edzon, diris al li, spirante en la orelon:

— Kompatas mi kapitanon Atanazion Petroviĉ-on. Vidu — li hodiaŭ eĉ ne aperis.

Silvestro Petroviĉ malgaje subridis:

— Nu, Manjo, nu, kara, ne eblas ĉiujn kompati. Iru, amiko, dormi necesas, ni iru pli rapide. Kaj ankoraŭ ĝis la fortreso sur Dvino la vojo ne estas proksima...

En la velboato Silvestro Petroviĉ, volviĝinte en mantelon, pensadis siajn pensojn. Kaj Manjo pensadis. Rigardante al la kvietaj akvoj de rozkoloriĝanta Dvino, sulkante la brovojn, Manjo pensis pri tio, kiel ŝi revenos al Moskvo kaj nepre trovos tie bonan knabinon por edziniĝi al Atanazio Petroviĉ. La nupto estos en la fortreso, kaj por tia soleno ŝi petos Silvestron Petroviĉ-on, ke pafu ĉiuj kanonoj, kolubropafiloj, haŭbizoj kaj mortiroj. Estos ankoraŭ artfajraĵo...

Kaj tuj al ŝi iĝis malgaje: «Ne, al neniu li nun edziĝos! Sola por li estas Taisja, unu kaj sola. Ne tia li estas homo, por ankoraŭ foje en sia vivo tiel ekami. Unu foje — por ĉiam. Kiel mi — Silvestron. Kiel Taisja — Ivanon Sabateiĉ-on... Ne, estos nek gaja nupto, nek kanona pafsaluto, nek artfajraĵo...»

Ĉapitro dua

> Ne malhonorigu ni la teron Rusan, sed falu mortintaj, ĉar mortintoj malhonoron ne havas. Ni staru firme...
>
> *Svjatoslavo* [112]

> Vere ankaŭ ni ne sub manegon, sed en la buŝon mem de la malamiko iras, tamen ne timas.
>
> *Petro I*

1. La petskribuloj

En la tria fojo de torturo per fajro Eŭtimio Gridnev ne eltenis, nomis ankoraŭ kelkajn homojn. Kancelariano Molokojedov sendis homon al la dumaano, kaj mem milde demandis:

— Homo el la Kanona korto, nomata Teodozo, alnomata Forĝisto — ĉu estas via? Respondu, povrulo, vi povas ja morti. Respondu la demandon...

Gridnev, ne aŭdante, ne komprenante, ripetadis:

— Alnomata Forĝisto — nia!

Pozdjunin alportis al la torturito kruĉeton da brando, la senteruloj surŝutis la brulvundojn per cindro. Gusev, movante

---

112 Svjatoslavo Igoreviĉ (?–972) — princo Novgoroda kaj granda princo Kieva (945–972), fama kiel militestro. Tiuj vortoj estis, laŭ la Nestora kroniko, diritaj de li en parolo antaŭ batalo dum la rus-bizancia milito. La vortoj «mortintoj malhonoron ne havas» estis multfoje cititaj en la rusa literaturo kaj fakte iĝis proverbo *(trad.)*

la nazon super papero, estis rapide skribanta. Ekknaris ŝtupoj, venis dumaano Larionov, li apenaŭ viva fuĝis el Onego, elŝiri impostojn eĉ kun soldatoj estis afero malfacila.

— Kio estas ĉi tie?

Molokojedov respekte rakontis: ĉi latrono komencis agnoski sian kulpon, ili donis al li brandon, — la afero, evidente, ekmoviĝis. Pli malfrue, vespere, probable, ankaŭ la vojevodon eblos voki. Larionov, balancante la boteton, kapjesis. Rigardon ĉe tio li havis vakan, li ĉiam rememoradis, kiel kun malhonoro li fuĝis de virinoj kaj knabinoj en Onego, kiel glitfalis en marĉeto kaj plaŭdis por ilia rido, kiel demetis ili de li, dumaa nobelo, pantalonon kaj vipis per urtiko. Estas bone, almenaŭ, ke la soldatoj ne vidis. Sed eble vidis? Ja kriis hodiaŭ infana voĉo el post barilo: «Jen, nobelo vipita, pantalonon perdis...» Ili eksciis, diabloj!

Vespere Aleksio Petroviĉ Prozorovskij, ĝismorte timigita de la kancelarianoj kaj Larionov, bonvenis en la torturejon, por ekscii amplekson de la komploto, informiĝi pri venintoj el Azovo, elradikigi proksimiĝantan ribelon kaj ree montri sin fidela hundo de la caro, kiel en tiuj tempoj, kiam konkurenci en fideleco al la Siro kun princo Prozorovskij povis nur nun forpasinta Franz Lefort.

Kancelarianoj Molokojedov kaj Gusev, subtenante sub la brakoj, kondukis la vojevodon al la benko, sidigis sur kusenon, kovritan per tapiŝo, legis per du voĉoj la pridemandan torturan folion, ordonis al Pozdjunin ankoraŭ pendigi la latronon, por ke li diru la denuncon ĉe la princo mem.

La senteruloj eltrenis tion, kio restis de Gridnev. Pozdjunin enmetis la manojn de la malfeliĉulo en la ŝeklon, Eŭtimio kriis:

— Lasu min, monstroj, lasu, ne povas mi plu...

— Respondu, latrono, kiuj venintoj Azovaj, ribeluloj ĉi tie estis kaj kiajn ili al vi, latronoj, vortojn diris! — ordonis princo. — Parolu!

Gridnev silentis, liaj okuloj rigardis sensence, preter la homoj.

— Respondu!

— Lasu min!

Oni mallevis lin.

— Parolu do! — ordonis Molokojedov. — Forĝisto ĉu ne el Azovo estas veninto?

— Kiu Forĝisto? — per malviva voĉo demandis Gridnev. — Kia li estas?

— Forĝisto el la Kanona korto, el skismuloj, en ĉerkojn antaŭe delogadis kuŝiĝi. Se vi respondos — ni vin liberigos. Liberigos, kaj eĉ per mono rekompencos. Iros vi kien deziros. Parolu do! Ĉu estis Forĝisto?

Eŭtimio silentis, stulte rigardante al siaj turmentantoj. La vojevodo iomete atendis, poste koleriĝis, stamfis, ordonis sen prokrasto pendigi kaj torturi per fajro. La helpanto de la torturisto alportis brulantan faskon. Eŭtimio ekparolis obtuze, la lango estis malbone turniĝanta en lia sekiĝinta buŝo:

— Ĉiuj, ĉiuj tute, ĉiuj... Silentulo, fuĝinto de Volgo. Kapulo ĉarpentisto, kupristo Hermilo...

— Brulu per fajro! — ordonis la vojevodo.

Pozdjunin elkaptis de la helpanto la brulantan faskon, movis

ĝin sur la nuda dorso de Eŭtimio. Tiu skuiĝis, ekpendis. Kancelariano Gusev skribis rapide, kancelariano Molokojedov ĵetadis triumfajn rigardojn al la vojevodo. Eŭtimion oni pendigis ankoraŭ foje, li komencis nomi homojn en la Solombala ŝipkonstruejo, en la Baĵenina, en Vavĉugo. Kancelariano Gusev kun ĝojo flustris al la vojevodo:

— Jen ĝi! Ĉio estas ĉi tie! De Volgo, kie hetmano Razin iradis...

La dumaano konfirmis:

— Tiel, princo vojevodo, tiel! Sur unu ĉeno ĉiuj iras. Nun preni ĉiujn necesas.

La vojevodo ĉitis:

— Iru for de mi, konsilantoj!

Li leviĝis de sia loko, elŝiris de Pozdjunin la faskon, mallerte, oblikve ŝovis en la bruston de Eŭtimio, demandis, montrante la dentojn:

— Kiu estas ĉefo super vi? Parolu! Kiu la kalumnian, malhonoran petskribon pri mi, pri patro via vojevodo, faris? Kiu super vi ĉiuj, latronoj, estas estro? Parolu!

Eŭtimio movis la lipojn, sed neniu aŭdis liajn vortojn.

— Kiu? — defleksinte la orelon per la polmo, demandis la vojevodo. — Pli laŭte diru, mi ne aŭdas!

Eŭtimio streĉiĝis, elspiris:

— Krikov — kapitano de doganaj soldatoj. Al li ni iradis, foliojn kaŝajn, ribeligajn legadis, kun li pri ĉio parolis... Li kaj Silentulo super ni regis...

La vojevodo ordonis preni la kanonan majstron Forĝiston. Por Forĝisto oni sendis Meĥonoŝin-on kun dragonoj. Krikov-on la vojevodo preni timis, kaj Silentulo vivis kaŝe, pri li en la arestejo oni ne sciis. Altrenis oni ankaŭ ĉarpentiston Kapulon kaj kupriston Hermilon. De torturisto Pozdjunin ĝis la noktomezo ekverŝiĝis ŝvito, la senteruloj apenaŭ trenis siajn piedojn, sed ĉio senrezulte. La arestitoj nenion sciis.

Princo Aleksio Petroviĉ ekdeziris manĝi, sendis Molokojedov-on por vespermanĝo. Tiu revenis timigita, ekflustris al la orelo de la vojevodo:

— En via domo sur la perono la ĉefepiskopo sidas, kun minaca aspekto, en la ĉambron ne venas, ordonas al vi, princo, tuj veni al li. Servoknabo estas kun li, du servistoj, kuriero el malproksima vojo...

La vojevodo ne finaŭskultis, maltrankviliĝis. La kancelarianoj kun Larionov, subtenante sub la brakoj, kondukis la vojevodon al la kaleŝo, la kaleŝo ektondris per la feritaj radoj sur traboj de la pavimo, la ĉevalaj gardistoj kun halebardoj ekiris poste.

— Kio tie okazis? — demandis Gusev flustre de Molokojedov.

— Tio okazis, ke svedaj militistoj sur ŝipoj Sundon trairis — jam antaŭ longe! Jen kio okazis! — respondis Molokojedov. — Nun ili baldaŭ al ni venos... La cara oficiro pri tio mesaĝon alveturigis.

Gusev oĥis, la dumaano kriis al li:

— Nu, nu, ne kluku! Ni staras flanke. Ni iru la petskribulojn pendigi, finu kun ili, latronoj. En la petskribo ja ankaŭ ni estis

nomitaj, se okazos io — ankaŭ por ni ne estos bone. Ĉiel necesas spurojn kaŝi. Venos la svedoj — ni ĵuros al ili servi — la petskribuloj nin trovos, rememoros, kion ni ĉi tie faris. Ne venos la svedoj — ni tute bonon ne atendu. En Moskvo oni ekscios — ni estos sur ekzekuta ŝtipo. Do dume necesas mortigi la petskribulojn. Ĉio ja povas okazi... Sur pendigilo iuj rapide mortas.

— Kiun do la unuan fari?

— La unuan ni faros majstron Teodozon Forĝiston. Tiel mi sentas, ke li ĉe ili estas ĉefo...

— Krikov-on indus preni.

— Krikov-on? Sed ĉu la kapitan-komodoro lin eldonos?

— Li ankaŭ Forĝiston ne donus, sed ni ja ne demandis, kaŝe prenis...

Reveninte en la torturejon, ili sidiĝis ĉiuj apude sur la kusenon, kovritan per tapiŝo, interflustris, vokis Pozdjunin-on, ordonis al li tuj fari latronon Teodozon. La torturisto gratis sin, prokrastis.

— Kion vi atendas do? — demandis Molokojedov.

— Ja tion, ke oni min demandos. Fari lerte necesas, kaj se iun ĝis morto — pro tiu mi responsas...

— Kiel dirite estis — lin prilaboru!

Pozdjunin kun suspiro ekiris al la loko. La senteruloj deŝiris de Forĝisto la ĉemizon. Pozdjunin enmetis liajn manojn en la ŝeklon. Molokojedov demandis:

— Do, ĉu vi estas Forĝisto? Parolu, infano, ĉion, kion vi pri la petskribo latrona scias: kie estas ĉi papero, kiu ĝin kaŝas, —

diru rapide, urĝe...

Forĝisto silentis. Liaj okuloj akre brileradis, la kava brusto leviĝadis malegale. Torturisto Pozdjunin, metinte la polmon sur la ŝeklon, estis dormetanta stare. La helpanto estis trinkanta lakton el argila kruĉeto, almanĝante flanon.

— Faru lin, Pozdjunin! — ordonis Larionov.

La torturisto malfermis la okulojn, ekvigliĝis.

— La manojn supren, karulo, supren, kaj vi mem ŝoviĝu antaŭen, iomete antaŭe, infano, moviĝu...

Maŝo kunpremis la manojn, Pozdjunin apogis sin per la piedoj al la trabo, ekstaris, saltis. En silento ekknaris kanaba ŝnuro. Forĝisto tuta etendiĝis, pli klare elstaris la ripoj, ŝvito tuj kovris la nigran maldikan vizaĝon.

— Parolu, infano! — ordonis Gusev.

Forĝisto tiris antaŭen la kolon, demandis:

— Kial vojevodo via per knuto elbatas por si monon el metiistoj? Kial sen subaĉeto neniun aferon solvi eblas? Kial nun en Onego...

— Ankoraŭ pli levu! — ordonis la dumaano.

Frapis la pordo, en la torturejon eniris ebria Meĥonoŝin, diris tra la dentoj:

— Bruligi ilin ĉiujn per fajro, Herodajn idojn! Ĝismorte! Vejnojn tranĉi, fingrojn rompi...

Ekfajfis la kanaba ŝnuro, Forĝisto ekĝemis, poste denove estiĝis silento.

Meĥonoŝin demetis ĉe la pordo la uniformon, la puntojn,

rubandojn, ŝanceliĝante aliris al Pozdjunin, mem prenis la ŝnuron. Pozdjunin la ŝnuron ne donadis, la kancelarianoj maltrankviliĝis, komencis persvadi la leŭtenanton, ke li ne ekscesu. Meĥonoŝin postulis fajron, per la piedo batis la helpanton, kriis, ke ekde la nuna tago li mem ŝirados ungojn, boligados en peĉo, enbatados najlojn, — ne tiel necesas torturi! Poste li ekploregis, foriris flanken, plende lamentadis:

— Panjo mia kaj paĉjo, bonaj miaj gepatroj, kial vi min forlasis, infanon vian, por kio ne prenis kun vi en la restadejon feliĉan...

Forĝisto silentis, kaptadis per la malfermita buŝo la aeron. Liaj okuloj nebuliĝis, li nenion vidis kaj aŭdis.

— Rekonsciigu lin per akvo! — ordonis la kancelariano. — Kaj tuj!

La helpanto alportis bastan sitelon, Pozdjunin mallevis la ŝeklon kaj malrapide, per mallarĝa strio komencis verŝi la akvon al la vizaĝo de Forĝisto.

— Ankoraŭ levu! — ordonis la dumaano. — Tuj, tuj... Ĝis mateno ni ĉiujn finos, ripozi iros!

2. Jen ĝi, la floto!

La velboato iris rapide, vento blovis favora, glata, forta. Antaŭ ol malhisi la velojn, Semisadov levis pistolon — pafis en la aeron, poste levis sur la masto vimplon, post ĝi duan, poste trian. La flagetoj malvolviĝis, de la bordo oni respondis per pafo.

— Grave vi vivas! — diris Rjabov. — Sen signalo ne eblas

eniri, ĉu?

— Tie kanonoj estas kaŝitaj! — respondis Semisadov. — Fremdulon oni ne enlasos...

— Kial do min vi enlasas?

— Laŭ ordono de sinjoro kapitan-komodoro. Estis ordonite al rudristo Rjabov montri la ŝipan floton, la fortreson-citadelon, la Markan insulon kaj sur ĝi la baterion, aliajn kelkajn kanonojn, la kaŝitan ĉenon. Ankoraŭ — kion li deziros...

Rjabov ridetis, movis la rudron, la velboato estis malrapide turniĝanta per la pruo al la enirejo de la haveno. Fortikaj pinoj estis defendantaj ĝin kontraŭ scivolemaj rigardoj; de ĉi tie, de la maro, ĝi ŝajnis senhoma kaj neloĝata. La akvo estis brilanta sub varmegaj sunaj radioj, estis silente, sufoke, la vento subite tute ĉesis. Ili ekiris en la havenon per remiloj, kaj, tuj kiam ili preteris la apudbordajn grizajn, muskajn ŝtonegojn, al la rigardo de la rudristo malkovriĝis ŝipoj — grandaj, novaj, kun alte levitaj ĉizitaj poboj, en araneaĵo de ŝnuraro, kun malfermitaj kanonaj embrazuroj, en kiuj videblis kupraj kanonoj. Klare, kvazaŭ viciĝinte, senmove rigidiĝis la eskadro antaŭ la kruta verda bordo.

Silente per siaj helaj okuloj la rudristo pririgardadis la sveltajn konturojn, mastojn, jardojn, serĉis, kiuj do el la ŝipoj estis konstruitaj per liaj manoj en tiuj antaŭ longe pasintaj jaroj, en la Solombala ŝipkonstruejo. Sed li tuj forgesis, pri kio li ĵus pensis, kaj komencis pririgardi kanonojn sur la ŝipoj, taksi ilian nombron kaj pafan forton. Kanonoj estis multaj, kaj Rjabov mire balancis la kapon: vidu, ŝipoj de milita floto, vere tiel, nenion eblas diri...

— He, ankoraŭ premu! — ordonis li al Semisadov.

Tiu, ĝojante pri la perpleksa kaj kontenta vizaĝo de Rjabov, apogiĝis per sia ligna kruro al la benko, forte svingis la remilojn — la velboato glitis antaŭen, pli proksimen al la ŝipoj. Ili ankoraŭ elkreskis, iĝis pli grandaj, altaj, la ĉizaĵo sur la pobo de la nova fregato iĝis pli klara. Trans la ŝipflankon pendiĝis ronda blonda kapo, en fiŝista maniero, kiel oni parolas en Onego, demandis:

— Kiu iras? Respondu!

— De sinjoro kapitan-komodoro velboato laŭ lia ordono! — demalsupre supren kriis Semisadov. — Saluton, Miĥaelo!

— Saluton, sinjoro ferdekestro!

— Li kiu do estas Miĥaelo? — demandis Rjabov.

— Ja de forpasinta Mokeo nepo, de la fiŝista avo, vi ja de li la brigadon akceptis! — rememorigis Semisadov. — Nun li estas bona matroso.

— O ho! — miris Rjabov. — Iras tempo ja, kuras...

Per remiloj ili nehaste ĉirkaŭiris ĉiujn jaĥtojn, fregatojn kaj ŝipojn, proksime pririgardadis mallevitajn ŝtuparojn, ankrajn ŝnuregojn, skulptitajn el malhela transmara ligno terurajn figurojn, kiujn oni metadis antaŭe sur ĉiu ŝipo. Matrosoj rigardis desupre al la velboato de la kapitan-komodoro, de unu jaĥto aŭdiĝis kanto, de alia — sonoj de ŝipa klariono, sur la tria estis farata ekzerco: la matrosoj kvazaŭ estis prepariĝantaj ŝargi kanonojn, pafi, purigi kanontubojn, ankoraŭ ŝargi.

— De kie do oni prenis tiom da popolo? — demandis Rjabov.

— Ja niaj Blankmariaj estas preskaŭ ĉiuj, — respondis Semisadov. — Tiam, en la pasintaj tempoj, ni ŝercis, sed nun ne, ni ne ŝercas. Maro estas nia kampo...

Nur antaŭ mateno ili atingis Arĥangelskon. Rjabov estis pensema, liaj okuloj rigardis severe, la frunto sulkiĝis. Nemalproksime de la Resurekta kajo li demandis:

— Povas ili vere traŝiriĝi al la urbo, ĉu, ferdekestro?

— Ĉu la svedoj?

— Ili.

— Ni ne permesos! — kun trankvila pigreto en la voĉo respondis Semisadov. — Ne atingos ili nian floton.

3. La kapitan-komodoro kaj la vojevodo

Princon Prozorovskij-on skuis tremo: svedaj ŝipoj trairis Sundon antaŭ longe, ili tuj devis aperi en la Blanka maro. Kaj ne ŝipoj — eskadro.

— Sed vi ne plu forlasu la urbon! — kolere prononcis Atanazio. — Vi estas vojevodo, ĉi vorton penetru per la kapo, per via menso...

Li subridis, liaj okuloj akre brileris:

— Vojevodo brava — sub arbusto sidas kaj lamentas!

La oficiro, liverinta el Moskvo la leteron pri la sveda eskadro, estis pririgardanta la princon impertinente. Aleksio Petroviĉ intencis ofendiĝi, sed mankis kuraĝo, li ridetis mizere, komencis preteksti malsanojn. Atanazio interrompis:

— Ievlev Silvestro Petroviĉ estas multe pli malsana, ol vi, kara princo, sed antaŭ la malfeliĉo ĉiujn malsanojn li kvazaŭ

forgesis, estas agrable rigardi al sinjoro kapitan-komodoro. Mi estas maljunulo, per unu piedo en ĉerko staras, ne esperas eĉ morgaŭan matenon vidi, tamen mi ne plendas. Sed vi, vojevodo, por kio do senhonoriĝas?

Aleksio Petroviĉ tute ne trovis, kion respondi. Kuracisto Loftus kun riverencoj estis disverŝanta malvazion, servisto estis disportanta fiŝon en salakvo, batitan brasikon, fungojn. La ĉefepiskopo Vaga kaj Ĥolmogora sidis morne, rigardis malsimpatie, la manĝon kaj vinon ne tuŝis. Nur la veninta oficiro, malsatinte dum la vojo, manĝis kiel dek homoj.

— Hodiaŭ mi al monaĥejoj veturos, — ree ekparolis Atanazio, — kaj ankaŭ la fortreson vizitos. Skuos mi la monaĥojn iomete, ankaŭ ili renkontu la latronojn inde. Kaj vi, princo, pri malsanoj forgesu eĉ pensi — ne konvenas tio por vojevodo antaŭ malfeliĉo. La popolo eĉ ridas; oni babilas, ke nia princo-vojevodo, preninte ĉapon, fuĝis...

Prozorovskij, tute ofendiĝinte, kriis:

— Babilulojn torturisto Pozdjunin je la ripo pendigos — ili tuj eksilentos!

— Do vi estas stultulo! — trankvile respondis Atanazio. — Je Dio, stultulo! Torturisto! Ĉu multe vi kun via torturisto kontraŭ la svedo faros? Eĉ sen tio plorĝemo estas, ke vi ĉiujn kaptas, tamen vi ankoraŭ pli intencas? Ja ne kluku, kiel kokino, aŭskultu min...

Batante per la manrando la tabloplaton, li komencis konsili, kiel devas la vojevodo gvidi defendon de Arĥangelsko, kiel necesas pensi pri nutro por defendantoj de la urbo, kiel pri ĉio anticipe interkonsenti kun la kapitan-komodoro, kiu komandos

la batalon de la fortreso kontraŭ la eskadro...

— Ne subiĝos mi al li! — ree ekscesis la vojevodo. — Kio li estas por mi?

Atanazio frapis per la polmo la tabloplaton:

— Subiĝos! Li estis de Petro Aleksejeviĉ sendita...

— Ankaŭ mi, mastro, estas enpostenigita de la Siro!

La ĉefepiskopo malfermis la buŝon — respondi, sed nenion diris: nur malforta plenda ĝemo eliĝis el lia brusto, la vizaĝo terure paliĝis, la mano spasme kaptis la tablotukon. Loftus, faliginte la benkon, ĵetiĝis al la eminenco, al la bruo en la manĝohalon enkuris la servisto kaj la servoknabo de Atanazio. La eminenco mallaŭte petis:

— En la kaleŝon min! Malbone!

Loftus-on al si li ne allasis. La servisto donis al li flari salon el flakono, li trinkis kvason, frapante per la episkopa bastono, malrapide ekiris al la pordo. Dum la irado li diris al la princo:

— La fortreson jam hodiaŭ vizitu! Vojevodon en malbona tempo oni devas vidi, sed vin, krom la princino, kaj la princidinoj kun via princido, kaj krom blatoj sub la forno — kiu vidas? Ĉu la torturisto en la torturejo? Malbonan vi trovis tempon furiozi, per via krueleco timigi...

En la korto, ripozante, li diris:

— Ankoraŭ vi ne bone faras: kial vi princidon vian, kiam estas granda malfeliĉo, kaŝas kvazaŭ maljunulon. Homoj ja scias: viro elkreskis per tritika pano — ŝultroj larĝaj kiel klafto. Donu al li sabron aŭ muskedon, kaj ne kaŝu ĉe vi en Ĥolmogoro...

Kaj li svingis la manon:

— Vane mi parolas kun vi. Nenion vi komprenis. Fi, princo!

La kaleŝo, bruante per feritaj radoj, elveturis el la korto; la vojevodo, tenante sian kapon, ekiris en la dormoĉambron. La kuracisto kun timigita vizaĝo senbotigis la princon, konsilis nenion alpreni al la koro, konservi trankvilon, necesan por subteno en la korpo fajron-flogistonon.

— Iru vi for kun via flogistono! — bruske respondis la princo. — Flogistono! Ĉi tie estas perfido ĉirkaŭe, latronoj, ofendantoj, sed li galimation diras. Metu hirudojn, alie mi mortos!

En la dormoĉambron venis la princino, post ŝi — la maljunaj fraŭlinoj princidinoj, malantaŭe la princido. La vojevodo, ĝemante, rakontis pri la sveda eskadro; kuracisto Loftus aldonis de si, ke li humile petas forliberigi lin al Vologdo aŭ al Moskvo, ĉar la svedoj punos morte la fremdlandanon, kuracantan la princon-vojevodon kaj la tutan princan familion.

— Sed vin ja pro kio? — ekkriis princino Eŭdokia.

La kuracisto dismovis la manojn.

— Sed ĉu ni vere ne venkos la svedon? — demandis la princido.

La kuracisto delikate ridetis, nenion respondis; poste, deŝirante hirudojn de la bojara nuko, rakontis kvazaŭ senintence, ke la dvinanoj sub estrado de la princo, certe, defendus la urbon, sed tro granda estas perfido; ekzemple, en la citadelo estas tenata iu Nikeforo. Li venis de la maro, sendube estas sendita de la svedoj, sed oni kuracas lin tie kaj prizorgas

lin, kvazaŭ li estas ĉefduko. Samtempe kanona majstro Ripley estas malliberigita en la citadelo, same kiel inĝeniero-veneciano — Georgo Lebanius. Kanonoj de la fremdlandaj negocaj ŝipoj per ordono de Ievlev estis demetitaj, kaj ja la eksterlandaj ŝipanoj ĵuris pafi per tiuj kanonoj al la sveda eskadro. La kanonoj estas bonaj, ĉu lokaj kampuloj povas regi ilin? Kaj kiuj estas la lokaj kanonistoj? Eble, ili estas el tiuj, kiuj intencas ribeli? Hodiaŭ estas ankoraŭ novaĵo: venis el la maro granda barko, trimasta, unufoje ĝin oni vidis kun plena ŝarĝo, kaj duan fojon — tute sen ŝarĝo. Kiu sur la barko venis? Eble, svedoj? Iras tra la urbo alivestitaj, nun serĉu ilin...

La vojevodo aŭskultadis, palpebrumadis, la princino krucosignadis sin, la filinoj interrigardadis, la princido diris rezolute:

— Se tiel, por kio do militi? Se kun humileco la ŝlosilojn de la urbo...

— Kun humileco? Vin mem estas ordonite fari pafisto.

— Min? Ja mi, patro, estas infano naiva, kial min...

Princino Eŭdokia komencis plorlamenti, sed la princo bojis:

— Silentu, stultuloj!

Kaj elpelis el la dormoĉambro ĉiujn, krom Loftus. Loftus kalkulis al la princo pulsobatojn, balancis la kapon, kun bedaŭro prononcis:

— Ree en viaj vejnoj plirapidiĝis demetiĝo de hidrargo, sulfuro, kaj ankaŭ de salo.

La vojevodo silentis enpensiĝinte, poste leviĝis de la kuŝejo, ordonis vesti sin. Loftus donis kirason, sabron, pistolojn.

— Por kia diablo? — demandis la vojevodo.

— Svedoj estas proksime! — prononcis la kuracisto.

Dum la tuta vojo ĝis la fortreso la vojevodo estis pensema, per dormemaj okuloj ĵetadis rigardojn al la malaltaj verdaj bordoj de Dvino. Loftus per naza voĉo kantetadis psalmojn, remistoj sur la velboato egalmezure levadis la remilojn, la vojevodo plu pensadis siajn pensojn, poste per la fingro vokis la kuraciston, diris per pligajiĝinta voĉo:

— Ne necesas por vi al Vologdo veturi aŭ al Moskvo...

Loftus mire levis la mallongajn brovetojn.

— Ni aranĝos jam hodiaŭ la aferon konvene...

La kuracisto ree komprenis nenion.

Silvestro Petroviĉ renkontis la vojevodon kun tuta deco ĉe la pordego de la citadelo kaj eĉ kun la kuracisto estis ĝentila, kvankam esprimis nenian plezuron de la renkontiĝo kun li. Inĝeniero Rezen okupis atenton de Loftus, kondukis lin en sian domon, por konversacii pri sano de la kapitan-komodoro. En pura, odoranta je pinaj traboj ĉambro li sidigis la gaston dorse al la fenestro, ekparolis afable pri eksterlandaj ĉefurboj. Komenciĝis senĝena konversacio.

En la sama tempo ĉe si en la komandantula ĉambro Ievlev estis regalanta la vojevodon per kvaso, preparita de Manjo. La vojevodo laŭdis la kvason — tian en ĉi-tieaj lokoj ne eblas trovi, — laŭdis la kapitan-komodoron, ke la citadelon nun tute ne eblas rekoni, multe estas konstruite, laŭdis ordon sur alirejoj al la fortreso. Silvestro Petroviĉ singarde silentis: la vojevodo venis ne por laŭdi!

— La pordon ja fermu, sinjoro, pli dense! — petis la princo.

La kapitan-komodoro ĵetis suspekteman rigardon al la princo, leviĝis, fermis la pordon. La vojevodo estis silente glutanta kvason. Poste, glatumante la lipharojn, demandis:

— Kiel vi esperas, sinjoro Ievlev? Ĉu ni rebatos la svedon?

Silvestro Petroviĉ pensis, respondis ne tuj:

— Malfacile estos, princo-vojevodo. Tre malfacile. La svedo iras per granda forto. La ŝipanaroj de la eskadro deziros rabi, tio estas al ili promesita, mi pensas. Urbo Arĥangelsko estas fama kiel riĉa urbo. Reĝo Karolo mem sendis la eskadron, subadmiralo Gyllenstierna estas sperta maristo...

— Saĝe vi parolas! — aprobis la vojevodo. — La malamiko iras per granda forto, sed ĉe ni ĉio estas ne bonorda. La dumaano, fidela homo, saĝulo, sinjoro Larionov, delonge faras enketadon kaj eltrovis, ke estos ĉe ni ribelo. Nun ankaŭ mi persone dum nemalgranda tempo en la arestejo laboris kaj pri vereco de ĉiuj tiuj abomenaj aferoj, de sinjoro Larionov malkovritaj, konfirmon ricevis. Estis prenitaj de dragonoj ĉirkaŭ dekdu malnobluloj, intencantoj de ĉi latronaĵo; ankoraŭ necesas kapti kaj kapti. Venintoj el Azovo, lokaj latronoj, el Moskvo fuĝintaj pafistoj, aliaj diversaj plebanoj agnoskas sian kulpon pri tio, ke ili min, sian vojevodon, intencis levi sur lancojn, — ĉu tielaĵo estis aŭdita? Kion ili en Azovo faris — ankaŭ ĉi tie fari decidis. Kaj en kia tempo? Ĉio tio estas afero antikrista de Razin Steĉjo: onklon mian, karmemoran princon-bojaron Prozorovskij-on en Astraĥano ili pendumis, kaj ĉi tie ili la samon intencis, sed ne tiel tio simplas! Kaptis ni ilin. Kaj ankoraŭ kaptados, tamen kia povas esti milito — se ankaŭ en la militistaro estas ribeluloj, kaj en la ŝipkonstruejoj, kaj en la

apudurboj. Kanona majstro, alnomata Forĝisto...

— Kio pri Forĝisto? — interrompis malpacience Ievlev.

— Tio pri Forĝisto, ke ankaŭ en la Kanona korto estas perfido. Ĉi malnoblaj latronoj ribeligajn foliojn legadis pri tio, kiel mian kaj vian kapojn sur palisojn meti. Tion la afero atingis kun ĉi latronoj, sinjoro kapitan-komodoro, ke oficiroj kelkaj, pri kiuj vi nemalgrandan esperon havas, viaj oficiroj al la ribeluloj aliĝis.

— Ĉu oficiroj?

— Oficiroj, kara mia, oficiroj, sinjoro kapitan-komodoro. Kiam oni sonorigos alarmon — ĉi oficiroj mem kondukos la ribelantojn kontraŭ vi kaj mi...

— Kiuj do ili estas — la oficiroj? Kiaj estas iliaj nomoj?

— Dume mi ne diros. Vi ne kredos. Sed siatempe mi vin venigos en la torturejon, por ke vi per viaj propraj oreloj aŭdu latronajn perfidajn parolojn. Nu, pri tio ni ankoraŭ sukcesos paroli. Nun pri alio pensi necesas: kiele vi kontraŭ la svedo batalos, kiam malantaŭ via dorso estas latronoj, kiuj nur atendas la svedon sur nian teron. Granda sango verŝiĝos kristana, sed por kio?

Silvestro Petroviĉ leviĝis, peze apogiĝante sur la bastono, trairis la ĉambron el angulo en angulon. La vojevodo senĉese observis tion, kiel ŝanĝiĝadis lia vizaĝo, kiel kvazaŭ estingiĝis la okuloj, kiel etaj gutoj de ŝvito aperis sur la alta frunto, sur la vangaj pometoj.

— Venkobatos nin la svedo! — insiste diris la vojevodo. — Batos kaj bruligos urbon nian, kaj masakros tiom da popolo, kiom deziros. Kaj vi pendos en maŝo...

Ievlev silentis.

— Kiam iros ŝipoj svedaj preter via fortreso — kion vi faros? — mallaŭte demandis la vojevodo, elmetinte antaŭen la grasan mentonon.

Silvestro Petroviĉ respondis obtuze:

— Sciate kion! Pafos mi per kanonoj.

— Jene, per kanonoj. Sed vin oni tiutempe al la kapo per martelo — la propraj kanonistoj...

— Min? Por kio do min?

— Vin, certe vin!

Ievlev deziris diri ankoraŭ ion, sed la vojevodo ne permesis:

— Kvazaŭ al vi oni tranĉilon ne ĵetis. Mi ja scias, mi ĉion scias... Kaj tranĉilon oni ĵetis en printempa nokto, kaj viro al vi en arbaro ĵetiĝis por tranĉmurdi. Liberigis vi lin. Bonkora, aĥ, bonkora...

Silvestro Petroviĉ forturniĝis — estis abomene rigardi, kiel ĝojas, frenezumas kaj histrionas Prozorovskij. Kaj kio do estas gaja? Sed tiu plu parolis, kliniĝante al Ievlev, varmege spirante per la harkovrita buŝo, — laŭte, penetreme, edife:

— Bonkora ja ne eblas esti, karulo: laŭ Dio nun vivi ne eblas, ne. Al vi oni tranĉilon ĵetis, estas bone, ke ne ĝis morto; min jen oni sur lancojn intencas levi, sed mi ne lasos. Estas terure, kapitan-komodoro, tre terure! Plebo, hundaĉoj! Mi kaj vi por ili la gorĝon ŝtopas! Vi la citadelon konstruas, vi ilin per forto kunpelis ĉi tien, mi de ili impostojn elŝiras, mi por ili estas juĝisto, — ho, malfacila estas nia sorto, eksciis mi ĝin, ekde Azovo mi timon sufiĉe vidis. Sed kial vi koleras? Kial

rigardas lupe? Ĉu mi ofendis vin senintence? Nu, lasu, lasu, ĉiuj ni estas homoj, ĉiuj penas fari bone, sed ĝi subite iĝas malbono. Okazadis, ke ankaŭ mi koleris, okazadis, ke ankaŭ vi kontraŭ mi diradis — ho, juneco, sed tamen dise ni neniel povas. Nur ni du estas ĉi tie la caraj servantoj. Du! Unu sango estas en ni, ĉe unu sama tablo niaj patroj kaj avoj en caraj palacoj sidadis — mia pli alte, via malpli, — sed la tablo ja estas unu, manĝo ja estas unu, la cara, kiel do ni kverelu? Nu, kaj sufiĉas! Eksidu apude, ni parolu konfide. Eksidu, ne staru...

Ievlev eksidis, kunmetis la fingrojn sur la tenilo de la bastono. Estis videble, ke ne tro atente aŭskultis li la vojevodon, pensis sian malgajan penson. La vojevodo per la mano, kovrita per ringoj, tuŝis la kubuton de Ievlev, demandis konfide:

— Ĉu viktorion super la svedoj vi ne atendas?

— Mi ne scias, kiel respondi, — seke diris Silvestro Petroviĉ. — Ĝis la nuna tago mi atendis kaj firme esperis. Sed hodiaŭ... Se estas vero, ke alarmo sonoros kaj ĉiuj laborantoj, kaj soldatoj, kaj metiistoj leviĝos...

— Vero! — kun ĝojo en la voĉo ekkriis Prozorovskij. — Pura vero! Vi mem jam hodiaŭ en la torturejon venu, mem iliajn malnoblajn parolojn aŭskultu...

Silvestro Petroviĉ kun ĉagreno interrompis la vojevodon:

— En torturejo oni eĉ ne tiajn aferojn pri si rakontas. Mi la aŭtentikan veron scii bezonas, ĉar se tio ne estas virinaj fabeloj pri perfido kaj pri alarmo — tiam...

— Kio — tiam? — avide demandis la vojevodo.

— Tiam — batos, bruligos, buĉos nin la svedoj.

Prozorovskij proksime kliniĝs al Ievlev, flustris:

— Jen, iluminiĝis vi. Komprenis finfine. Por kio do ni tiel faru? Por kio ni vane sangon verŝu? Pri viktorio ni ne esperas, sed pri kio? Ĉu duan Narvon ni bezonas? Ĉu nur ĝi mankas?

Ievlev per senmovaj okuloj rigardis al la princo, demandis abrupte:

— Kia Narvo? Ne komprenas mi, pri kio temas?

— Kia Narvo, vi ne komprenas? Tiu, kiu estis! Tiu, pri kiu la svedoj medalon stampis. Batalo morta, terura, malhonoro grandega! Ĉu vi forgesis?

— Mi — ne forgesis! — firme respondis Ievlev.

— Kaj se ne forgesis, tiam aŭskultu. Aŭskultu min, kapitan-komodoro, kaj komprenu, ne ekflamu vane, mi vian naturon bone konas, mi mem estis juna, sed lacigis la stalonon krutaj montoj. Alie necesas fari, pli saĝe, kun ruzo. Jen kiel, aŭskultu: ekscios mi kaj vi, ke la eskadro sveda aliris, tuj — sur velboaton kaj renkonten. Sur kuseno — la ŝlosilojn de la urbo Arĥanĝela, en sakoj — la fiskon, kiu konserviĝas ĉe la kancelarianoj...

Ievlev abrupte turniĝis al Prozorovskij, ekrigardis al li atente, kvazaŭ ekvidis unuafoje. La bluaj okuloj de la kapitan-komodoro lumis neelteneble hele.

— Por kio necesas sangon kristanan verŝi? — demandadis la vojevodo. — Por kio malfeliĉo, turmento malica, pendumiloj, ekzekutaj ŝtipoj, palisoj? Por kio vi kaj mi pereu per malica morto pro nenio? Por kiu tio estos ĝojo? Ĉu por malamikoj niaj, latronoj, ribeluloj? Vi mem juĝu, kiu por ni estas pli timinda: ĉu la svedo, kiu altigos nin, pro la honoro

duoble per honoroj redonos kaj ankoraŭ rekompencos laŭmerite, aŭ plebano, sklavo, ĉifonulo kun paliso, kun pikstango? Antaŭ nelonge aŭdis mi de dragona leŭtenanto Meĥonoŝin lian amaran malfeliĉon: kampuloj, bestoj kruelaj, hundoj fetoraj ribeliĝis, la bienon bruligis, la vokton sur pordego pendumis, incendio eĉ ĝis nun tie daŭras. Por kio estas ĉio ĉi? Por kia bezono? Kaj kiel ni tiun malfeliĉon venku? Kaj se la svedoj pace en la urbon eniros — ni al ili kun riverenco. Ĉu ili ordon ne bezonas? Ili obeeman kampulon bezonas, sed ne murdiston kun pikstango! Ili niajn malamikojn, ribelulojn, latronojn enketos, metos al ili finon...

Silvestro Petroviĉ proksime kliniĝis al Prozorovskij. Tiun subite timigis la vizaĝo de Ievlev, furiozaj liaj okuloj.

— Ĉu vi ŝercas, princo-vojevodo, aŭ serioze parolas?..

Prozorovskij retiriĝis, eksilentis, viŝis la vizaĝon per silka tuko. Liaj sataj vangoj estis ete tremantaj.

— Ĉu vi ŝercas? — kriis Silvestro Petroviĉ. — Do ĉi ŝercoj nun...

La vojevodo kaptis Ievlev-on je la manikroverso de la kaftano; sufokiĝante, singultante, li ekbalbutis:

— Mi elprovas vin, elprovas, amiko mia, elprovas, kia vi estas homo... Bezonas ja ankaŭ mi scii, kiu ĉe ni estas la unua milita komandanto, bezonas, nepre bezonas. Do jen mi provis, per dento vin elprovis, kiel oni oron elprovas. Nun mi scias, scias, nun mi vidas — ne ektimos vi! Nun mi al ĉiuj rakontos: bravan ni havas kapitan-komodoron! Ne eblas trovi tian, kiel Ievlev nia, Silvestro Petroviĉ. Batos li la svedon, certe batos, potpecojn ne eblos trovi! Fuĝos de ni la svedo, kun ploro

fuĝos, ni ekĝojos, sonorilojn batos...

Silvestro Petroviĉ silentis, plu same senmove kaj furioze rigardante al la princo. Kaj Prozorovskij plu parolis senĉese:

— Vi, Ievlev, oficiro cara, kapitan-komodoro — jen kiu komandu. De vi ĉio estos: viktorio de vi, malhonoro, konfuzo — same de vi. Ne juĝu, kara amiko, indulgu, se mi ion ofendan diris. Nun mi scias — vi batalos!

Ievlev interrompis lin, diris malvarme:

— Ne tiom mi, princo, estas stulta, ne tiom mensdebila, por ke al tiuj sensencaĵoj kredi.

La vojevodo nehaste verŝis por si kvason, nehaste glutis, metis la kruĉeton sur la tablon.

— Afero via: se vi deziras — kredu, ne deziras — ne kredu. Skribu al Moskvo, tie oni al vi, eble, kredos, ke bojaro princo-vojevodo instruis transiri al la svedoj. Skribu, skribu, estos multa rido...

Li klakfrapis per la manoj, en malfremda maniero puŝis Ievlev-on al la ŝultro:

— Do pafos vi al la sveda eskadro el via fortreso? Ĉu kuglegojn vi rezervis? Pulvon? Kanonistojn instruis, militisto? Ĉu?

— Kiam mi pafos — al la svedo ne plaĉos! — abrupte respondis Ievlev.

Prozorovskij per lupa rigardo por momento fiksrigardis la vizaĝon de Ievlev:

— Ĉu vi sukcesos?

— Necesas sukcesi. Vi, princo, ne helpos.

— Nu, bravulo, bravulo, — ekhastis la vojevodo. — Nun mi vidas — bravulo! Ja homoj diversajn aferojn babilas pri vi... Ĝis tio ili babilas, ke eĉ diris: loĝas, oni diris, ĉe Ievlev sendito de la svedaj militistoj — kampulo Nikeforo. Venis, oni diris, Nikeforo el la maro, alportis al Ievlev svedan sekretan leteron... Nu, konduku min al Nikeforo, rigardos mi al li, demandos, kia estas homo... Kaj de Nikeforo kondukos vi min, kara amiko, al la fremdlandanoj, al viaj arestitoj. Plendas oni pri vi, bezonas mi ankaŭ la prizonulojn fremdlandajn rigardi, nepre bezonas.

Ievlev respondis kun malamo en la voĉo:

— Nikeforo hodiaŭ fartas tute malbone, princo-vojevodo. Mi pensas, ne ĝisvivos li la morgaŭan tagon...

— Kial tiel? — gaje miris la vojevodo. — Ĉiam vivis bone, kaj jen subite morti ekintencis. Ne, ni iru, mi konversaciu kun li afable.

La kapitan-komodoro silente elkondukis la vojevodon el la komandantula domo en la fortresan korton. La princo iris ĉirkaŭrigardante, ĝemante: sur ŝtonaj platoj kun ŝriko oni trenis sur ŝnuregoj kanonon; fortresaj ĉevaloj, elbatante per hufferoj fajrerojn, trenis ĉarojn kun kuglegoj; knaris vinĉo, per kiu oni levadis sur la fortresajn murojn municion, interrompante unu la alian, batadis forĝaj marteloj...

Nikeforo kuŝis sur la dorso, dormis kun malfermitaj okuloj. Lia vizaĝo dum la pasintaj tagoj iĝis cindra, malgranda, kvazaŭ sekiĝis.

La vojevodo almontris per la fingro, demandis:

— Ĉu li?

Eksidis nemalproksime, tuj kriis, por timigi:

— Kiu vi estas? De kie? Mi scias, ke vi estas sveda militisto, de latronoj sendita, por malordon semi kaj malkonkordon! Parolu, ne silentu, respondu tuj!

Nikeforo suspiris, ekrigardis al Silvestro Petroviĉ, kvazaŭ petis defendon.

— Parolu, Nikeforo, — trankvile, per amika voĉo konsilis la kapitan-komodoro. — Parolu, amiko. Tio estas princo-vojevodo, li la puran veron scii devas, parolu, ne dubu.

Nikeforo diris mallaŭte:

— Malbone al mi estas hodiaŭ, Silvestro Petroviĉ. Jen mi kvazaŭ sonĝojn iajn vidas, jen entute ĉio perdiĝas, nenio estas... Kaj spiri neniel povas...

— Parolu! — kriis la vojevodo.

— Sed kion paroli do? — per malforta, sed trankvila voĉo respondis Nikeforo. — Ne sendito mi estas, ne sveda militisto...

— Kaj se ni vin pendigos? — demandis la vojevodo.

— Mi staras ĉe mia vero.

— Fingrojn ni komencos haki po unu, per fajro torturos, antaŭ la morto vi mem ĉion rakontos — malfrue estos, — promesis Prozorovskij. — Parolu nun!

Nikeforo malforte ridetis, nudiginte bebajn sendentajn gingivojn, streĉis la fortojn.

— Vojevodo-princo! — kun trankvila digno ekparolis li. — Rigardu al mi, ne opiniu ĝeno, vi ekvidos, kiom mi belas. Ĉiel

oni min torturadis kaj batadis en fremdaj landoj, ne dolĉe vivis la kaptito, ĉu eblas min nun per torturo timigi, per fajro, per pendigilo? Kaj kiom da vivo al mi restis?

— Por torturisto sufiĉos! — respondis la vojevodo.

Kaj, turniĝinte al Ievlev, li diris, ke ordonas Nikeforon jam hodiaŭ preni en la urbon por enketado. Silvestro Petroviĉ, tusinte, diris, ke la malsanan kriplulon li en Arĥangelskon ne sendos. Kaj mallaŭte, preskaŭ flustre aldonis:

— Sufiĉas, princo, feroci. Ĉi Nikeforo ĉifritan leteron en la citadelon veturigis, grandajn suferojn eltenis...

La princo aliris la fenestron, kriis al iranta pretere soldato:

— La kuraciston ĉi tien fremdlandan sendu, Loftus-on, kaj tuj! Kuru!

Kaj li ree eksidis sur la benkon, kunmetinte la manojn sur la ventro, turnante la dikajn fingrojn en ringoj. Nikeforo ree ekdormetis.

Loftus estis apude, venis tuj kune kun Jegoro Rezen. Prozorovskij ordonis al li rigardi, kian sanon havas Nikeforo. La kuracisto riverencis malalte, elmetis gravmiene la malsupran lipon, eksidis sur la benkon apud la malsanulo, prenis per la fingroj lian pojnon. En tiu momento Nikeforo penis levi la kapon, sed la malforta kolo ne tenis, la kapo ree falis sur la kusenon. Lia sulkita vizaĝo tordiĝis pro terura fortostreĉo, la lipoj penis diri ion, sed el la kava brusto aŭdiĝis nur gluglado. Ievlev aliris pli proksime, kliniĝis:

— Kio, Nikeforo? Kion vi bezonas?

— Li! — subite klare kaj eĉ laŭte prononcis Nikeforo. —

Li! Lin oni sur la galero veturigis al haveno Uleaborgo. Li estas svedo! Li — lin...

Loftus komencis kankroiri, Nikeforo kroĉis lian manon per siaj kripligitaj fingroj, Loftus tiris sin pli forte — Nikeforo falis de la benko per la vizaĝo al la planko. Rezen ĵetiĝis al li, subtenante per la manoj la kapon, flustris karesajn vortojn, sed Nikeforo, tuta etendiĝinte, ree kriis per lastaj fortoj:

— Spiono, sed ne kuracisto! De Stokholmo mem ni lin sur la galero veturigis, spiono li estas, hundo, ligu lin, homoj...

La kuracisto plu estis iranta kankre al la pordo, dismovante la manojn, penante ankoraŭ rideti. Silvestro Petroviĉ skuis lin je la ŝultroj, ordonis:

— Staru kviete! El ĉi tie vi ne foriros. Ĉi tie estas fortreso!

Kaj li kliniĝis al Nikeforo. Nikeforo plu flustris — kiel ili iris sur la galero de Stokholmo mem, kiel ĉi persono sidis en fotelo apud la ŝipestro mem, kaj kiam incendio fariĝis, la nomita kuracisto komencis pafi per pistolo al la bagnuloj. La rakonto de Nikeforo estis kohera, la kripligitaj okuloj rigardis racie. Poste li komencis konfuziĝi, al li mankis spiro. Ievlev duope kun Rezen levis lin sur la benkon, la inĝeniero alportis al la kriplulo trinki, sed tiu jam ne povis trinki, la akvo verŝiĝis sur la vejnan maldikan kolon. Egalmezura stertorado estis eliĝanta el lia gorĝo.

— Li mortas! — diris Silvestro Petroviĉ. — Voku la popon, Jegoro!

Jegoro eliris. La griza pro timo vojevodo demandis timide:

— Ĉu estas vero tamen? Obsedo, vera obsedo. Unu — spiono, dua — same spiono...

Loftus vigliĝis, alpremante la manojn al la brusto, komencis per teruraj ĵuroj ĵuri, ke ĉio ĉi estas kalumnio, misakuzo, mensogo. Silvestro Petroviĉ ne respondis. La kuracisto ekparolis pli mallaŭte, poste flustre. Ievlev sidis forturniĝinte. Loftus ankoraŭ foje ekpetis, poste eksilentis — komprenis, ke li pereis.

La maljuna fortresa popo, tenante la eŭĥaristion, envolvitan en epitraĥelio, riverencante al la senmova vojevodo, eniris en la ĉambron, post li Rezen kondukis du severajn matrosojn — aresti la nazparolan kuraciston.

— Iru! — ordonis Ievlev.

— La mortanto estas freneza! — ekkriis Loftus. — Febra deliro de forpasanto...

— Prenu lin, knaboj! — diris la kapitan-komodoro al la matrosoj.

La matrosoj prenis Loftus-on malantaŭe je la akraj kubutoj, li ŝiriĝis, tiam la matrosoj prenis pli forte, ektrenis al la pordo. Patro Johano, sidante ĉe la kapo de Nikeforo, estis faranta senrespondan konfeson. Prozorovskij estis ete krucosignanta sin. Silvestro Petroviĉ ekstaris, post li peze ekhastis la vojevodo. Lia grasa vizaĝo nun bruniĝis, li ĝibetiĝis, ĵetadis rigardojn al flankoj. Silvestro Petroviĉ iris, ne retrorigardante. En la komandantula ĉambro li haltis, diris al la vojevodo severe:

— Tiele, princo! Via plej bona konsilanto, amiko fidela estis ĉi tie sveda spiono. Alia venis anstataŭe — ankaŭ tiu estas sendito, spiono. Via dumaano Larionov, kancelarianoj viaj Molokojedov, Gusev, Abrosimov — estas koruptuloj, rabistoj

tagaj, en sangego vadas ĝis genuoj. Tiuj monstroj per knutoj, torturoj, timo elbatas por vi petskribon, vi ĉi falsan paperon al Moskvo sendas, por ke oni lasu vin ankoraŭ per cara favoro plu sidi en ĉi urbo. Vi mem tute la kapon pro timo perdis, ĝismorte timigita de la enketado, kiun faras via Larionov. Nun tion la afero atingis, ke vi, princo-vojevodo, proksima cara servanto, ne ŝerce, sed sincere penis persvadi min al la svedo transiri...

Prozorovskij, kun tute sangoplena vizaĝo, penis ankoraŭ foje ĉion malkonfesi, sed Ievlev frapis per la bastono la plankon, menciis Romodanovskij-on, radumadon pro perfido, la Preobraĵenskan kancelarion. La princo ekpetis:

— Pardonu, sinjoro kapitan-komodoro, je Dio mi elprovadis vin, bezonas mi scii, pardonu...

— Silentu, vojevodo! Pri oficiroj, kion vi antaŭ nelonge diris — pri la ribeluloj, — vi mensogis...

— Ne, je Dio, estas vero, jen sankta kruco por vi.

— Ne sakrilegiu!

Prozorovskij plorsingultis, komencis sveni:

— Malbone estas al mi, malbone, aĥ, sinjoro kapitan-komodoro...

Palpserĉante malantaŭ la dorso per disŝovita mano, li kankroiris al la benko, falis sur ĝin, sed Silvestro Petroviĉ rimarkis: la okuletoj de la princo rigardas akre, sana estas la vojevodo kiel ĉevalo, nur ludas komedion.

En la komandantulan ĉambron eniris inĝeniero Rezen; libere, sen ajna respekto al la vojevodo, eksidis, komencis elbati per fajrilo fajron por sia pipo. Prozorovskij sidis

ĝibetiĝinte, molaĉe, se tuŝi lin per fingro — li falus de la benko. Silvestro Petroviĉ, ne rigardante al la princo, ekparolis:

— Pro multaj viaj malsanoj eblas al vi, Aleksio Petroviĉ, kun la princino kaj la princidinoj, kun servistoj kaj kun kiu vi deziros — forveturi al Ĥolmogoro. Tie — sub forta gardo, por ke vi ne ekscesu, — vi transatendos. De malsana vojevodo oni ne povas postuli, dum de la malkuraĝa postulo estas granda: la popolo ne indulgos, la kapon forhakos...

— Pri tio estis kelkaj ekzemploj en la historio! — diris Rezen, snufante per la pipo.

— Estis! — konfirmis Ievlev.

La princo silentis. Liaj okuletoj estis kolere briletantaj.

— Ĉiujn, kiuj estis kaptitaj kaj al torturo destinitaj de la vojevodo, — daŭrigis per glata voĉo Ievlev, — dume per ukazo de la vojevodo mem mi el aresto liberigos. Mi hodiaŭ ĉiun homon bezonas...

Prozorovskij levis la kapon, diris, ne reteninte sin:

— Alte vi leviĝis, kapitan-komodoro, aj, alte! Ribelulojn, latronojn, ŝtatajn malicajn malamikojn liberigi? Ĉu vi Azovon forgesis? La pafistan ribelon forgesis? Amare vi la nunan horon rememoros, sed malfrue estos! Malfrue, ne reĝustigos! Al mi Petro Aleksejeviĉ en ĉio kredos, al vi kun via kanajlaro kredo ne estos donita! Ĉu vi ne kredas pri la oficiroj? Pro tio vi ne kredas, ke vi mem estas tia! Pardonu, sinjoro, la veron, sed mi tiajn kiel vi multe vidis dum mia vivo, tielajn viglajn saltulojn! Vidis, kaj postvivis...

Silvestro Petroviĉ, mallarĝigante la okulojn, demandis:

— Pri kio vi diras, princo?

— Vi mem scias, vi mem scias, pri kio. Nun estas via horo, sed morgaŭ ni vidos. Ĝisvivos ni ankoraŭ — kaj vidos...

Rezen en la angulo laŭte ektusis, akra pipa fumo ekrampis en la ĉambro.

— Ĉe malbonfarto en Ĥolmogoro estas bone! — diris la inĝeniero. — Por malsana homo ne estas pli bone, ol en Ĥolmogoro. En Ĥolmogoro estas kvieto...

La vojevodo raŭkis malklaran respondon — ne povis decidi, kion fari. Decidis anstataŭ li Ievlev:

— Tiel estos pli fidinde! — prononcis Silvestro Petroviĉ. — Al sinjoro pafista estro kolonelo Ruĵanskij mi sendos stafeton, por ke li donu pafistojn — kun deco akompani la malsanan vojevodon. Kun la pafistoj veturos subleŭtenanto Pustovojtov, kaj li al mi rakontos, ĉu la princo ĝisveturis en bona sano...

Prozorovskij, tute moliĝinte, oĥante, plu eksvenante, ekiris al la pordo. Ievlev kaj Rezen kun plena respekto kondukis la princon de la perono, — la laboranta popolo, plebo, malnobluloj ne devis scii, ke la vojevodo estis puŝe elpelita el Arĥangelsko en Ĥolmogoron, ke supre, inter la kapitan-komodoro kaj la princo, — estas kverelo, ke bojaro Prozorovskij estas perfidulo kaj malkuraĝulo...

— Vi veturas pro malbonfarto kaj pro multaj malsanoj, — severe diris Silvestro Petroviĉ. — Ĉu vi memorfiksis, princo?

La vojevodo kapjesis gravmiene.

Ili staris triope — atendis, kiam preterveturos grandega ĉaro kun jungaĵo el ses ĉevaloj. Sur la ĉaro oni veturigis fortresan

pordegon, kunigitan el feraj folioj, kun pikaĵoj kaj akraj dornoj. Post la pordego fortikaj ĉevaloj estis trenantaj feraĵojn, ĉio ĉirkaŭe grincadis, bruadis, tondradis...

Forakompaninte la vojevodon, Silvestro Petroviĉ diris al Rezen:

— Nu, Jegoro, malfacile al mi estos. Hodiaŭ la vojevodo penis persvadi al la svedoj transiri kaj bonvole porti al ili sur kuseno la ŝlosilojn de urbo Arĥangelsko. Kaj kiam tio ĉi ne sukcesis, li komencis jam en via ĉeesto minaci, ke mi mem estas ribelulo kaj ankoraŭ nesciate kio. Li en Azovo multajn pereigis, pro tio estas opiniata la plej fidela kaj nun iĝis por mi la unua malamiko. Ĉion necesas atendi, kaj pli ol ion alian — malbonon...

Li silentis iom, poste demandis:

— Se la vojevodo estas tia, kiun do eblas fidi?

— Min vi povas fidi, Silvestro Petroviĉ. Tiuj, kiuj en nia subteraĵo sidas arestitaj — estas fremdlandanoj, malamikoj por vi. Mi ne estas malamiko, sed same fremdlandano. Tio multon signifas, ĉu ne? Sed ni iru, vin atendas tiu glorinda piloto, kiu dronis, sed poste revenis, kaj lia edzino, kiu estis vidvino, sed nun ŝi estas ree edzino, kaj ilia infano, kiu estis orfo, kaj nun ne orfo. Ĉu mi ĝuste diras en la rusa?

— Ĝuste, ĝuste, brave! — subridante, diris Silvestro Petroviĉ.

— Ili alveturis en velboato! — diris Rezen. — Ili alveturis gaste. Ĉu tiel?

— Nu, tiel.

— Li deziras rigardi la tutan fortreson!

— Montru al li!

— Sed tio estas ne tiel! Mi eĉ al la vojevodo mem ne montris, sed nun montros al piloto?

— Montros!

— Por kio?

— Ja por tio, ke tiu piloto...

Silvestro Petroviĉ ne trovis, kion diri, kaj nur ankoraŭ foje ordonis:

— Vi montros ĉion, kiel estas. Kie kiaj mortiroj kaj haŭbizoj staras kaj staros, de kie kian pafadon ni faros, ĉion tiel, kiel vi al bombardisto Petro Aleksejeviĉ montrus.

— Sed kial?

— Tial, ke mi tiel al vi ordonas...

Rezen ne ofendiĝis, nur levis la ŝultrojn.

— Jen li, sur la perono sidas! — diris Ievlev. — Iru kaj montru kiel ordonite. Kaj revenu kun li — ni tagmanĝos.

La inĝeniero aliris al Rjabov, riverencis, diris kun subrido en la rusa:

— Al vi, sinjoro piloto, estas ordonite ĉion montri, kvazaŭ al bombardisto mem Petro Aleksejeviĉ. Ni iru.

La rudristo leviĝis de la perono, ŝovis la pipon en la poŝon, trankvile, kiel mastro ekiris rigardi la Novdvinan citadelon.

4. Duope

Fortresaj maljunulinoj lavis kaj vestis la mortintan

suferinton. Silvestro Petroviĉ ordonis doni por Nikeforo sian malnovan Preobraĵenskan kaftanon, la soldato iru en sian lastan vojon dece, ĉiuj vidu — nun oni sepultas ne sennoman vagulon, sed bravan rusan militiston.

Ferdekestro Semisadov trovis bajoneton, metis sur la bruston de la mortinto. Kaj la vizaĝo de Nikeforo subite iĝis signifa kaj treege trankvila, kvazaŭ li faris ĉiujn siajn laborojn kaj nun ripozas; la laboroj estis malfacilaj, kaj al neniu estas permesite malhelpi lian ripozon.

En la domon, kie kuŝis la forpasinto, krucosignante sin, eniradis fortresaj konstruistoj — masonistoj, ĉarpentistoj, forĝistoj; ili riverencadis longe, silente rigardis en la signifan vizaĝon de la mortinto. Jam preskaŭ ĉiuj sciis, ke Nikeforo rekonis svedan spionon, ke li mem fuĝis de la svedoj, ke li alportis iun sekretan kaj gravan leteron, kaj ĉiuj riverencadis al la forpasinto ne simple laŭ la moro, sed tial, ke li estis ĉi tie la unua, kiu ne cedis al la sveda latrono, iranta nun al Arĥangelsko.

Vespere por adiaŭi la mortinton venis kun tuta respekto la kapitan-komodoro — kun spado, en trikorna ĉapelo, en blankaj gantoj. Kanonistoj, ŝtontajlistoj, soldatoj disiĝis. Silvestro Petroviĉ surgenuiĝis antaŭ la ĉerko, ĝistere riverencis. La homoj en la domo suspiris per unueca suspiro, ĉiuj aprobis Ievlev-on: jen kiel oficiro respektas veran heroecon. Ekploris maljunulinoj. La maljuna popo, patro Johano, legis psalmaron anstataŭ ekdrinkinta diakono:

«Vi kaŝas Vian vizaĝon, tiam ili ektimas; Vi forprenas ilian spiriton, Tiam ili mortas kaj revenas al sia polvo. Vi sendas Vian spiriton, tiam ili kreiĝas; Kaj Vi renovigas la vizaĝon de

la tero.»

— Kaj renovigas la vizaĝon de la tero, — mallaŭte, per solaj lipoj ripetis Ievlev.

Elirante, li ekvidis Rjabov-on, — tiu staris ĉe la pordofosto, atente aŭskultante la vortojn de la Skribo. Mallaŭte ploris Manjo, senmove, tre pala staris Taisja. Kaj en la korto, apud la domo, en kiu kuŝis la mortinto, intervokante per gajaj voĉoj, estis ludantaj kaj kurantaj Ivaĉjo de Rjabov kun la filinoj de Silvestro Petroviĉ.

Ievlev eksidis sur benkon en la fortresa korto. Hirudoj sage flugadis super la kapo, ili jam elkovis birdidojn sub la rando de la kupolo de la hodiaŭ konstruita fortresa preĝejeto. Kaj la birdidoj elŝovadis el la nesto la bekajn kapetojn, avide malfermadis la bekojn, pepadis...

Silvestro Petroviĉ sidis longe, fumis, pensis. Pretere sur viŝtukoj soldatoj ekportis la ĉerkon en la preĝejon — por sepulta servo; popo Johano, malalte levinte la kapon, estis svinganta la incensilon, blua dolĉa fumeto de incenso ne solviĝis en la senmova aero.

Al Ievlev alsidiĝis Rjabov. Silvestro Petroviĉ demandis:

— Ĉu vi ĉion rigardis, Ivano Sabateiĉ?

— Rigardis mi ion! — respondis la rudristo.

— Nu, kiel? Ĉu rebatos ni?

Rjabov respondis ne tuj:

— La afero estas ne facila. Via citadelo, Silvestro Petroviĉ, ne pretas ankoraŭ. Unu muro tute ne estas finita, tie eĉ kanonon ne eblas meti. Kio, se ili morgaŭ aŭ postmorgaŭ venos, — tiam

kiel?

Silvestro Petroviĉ silentis. Pretere, mallaŭte konversaciante, trairis Manjo kaj Taisja. Li akompanis ilin per rigardo, ree pensis: «Jen, mi forprenas de vi vian rudriston, povas esti — por ĉiam. Ĉu multe gastis la edzo ĉe la edzino, ĉe la filo? Kaj ree li foriru!»

— La muro ne estas finkonstruita, tamen malprofundaĵo ruza antaŭ la citadelo estas! — obtuze diris Ievlev. — Tiu malprofundaĵo multan bonon povas porti al nia afero, se kun rapido, ĉe bona vento la flagŝipo surgrundiĝos...

Li ree eksilentis. Lia koro batis forte, tiel forte, ke al li iĝis subite malfacile spiri. Jen, venis la malfacilaj minutoj.

— Pensadis mi, Ivano Sabateiĉ. Pensadis nemalmulte. Necesas sendi al la latronoj sur la eskadron rudriston, tiu rudristo devas esti homo kuraĝa, homo, kiu estas konata al svedoj kiel sperta piloto. Kaj iras kun la eskadro niaj malnovaj konatoj: ŝipestro Urquhart, eskortulo Golgolsen kaj aliaj negocistoj...

— Konas mi ilin, — nelaŭte prononcis Rjabov. — Kaj ankaŭ ili min konas.

La rudristo subridis, ruzaj lumetoj ekbrilis en la verdaj okuloj.

— Ja ruza vi estas, Silvestro Petroviĉ! — diris li bonanime. — Ruze vi elpensis. Do... Ĉu la amikoj sur la eskadro? Servi al ili dece, al la malnovaj amikoj, — tio eblas.

Ievlev sendeŝire rigardis al la rudristo.

— Ŝajnigadis sin negocistoj, diabloj! — diris Rjabov. — Ĉi

Urquhart-on mi neniam forgesos... Do, kvazaŭ hazarde al ili trafi? Kvazaŭ mi fiŝis, kaj ili min kaptis?

— Hazarde! — diris Ievlev. — Pli malproksime de Arĥangelsko. En la gorĝo... La malprofundaĵon ni ankoraŭ fortikigos por certeco: boaton dronigos kun ŝotro, aŭ du boatojn. Buojn ni metos trompajn, kvazaŭ la ŝanelon ili montros, sed reale — la malprofundaĵon. Ĉio povas esti, la rudristo povas malĝuste kalkuli...

— Kial do malĝuste kalkuli? — demandis Rjabov. — Mia kapo, mi pensas, ne havas truojn, mi ne forgesos. Ĝuste mi iru, alian ne eblas trovi...

Ievlev profunde suspiris. Delonge li ne spiris tiel facile kaj trankvile, delonge la animo ne estis tiel plena kaj ĝoja. Li suspiris — kvazaŭ ĉio malfacila jam pasis, kvazaŭ li eliris el densa arbaro sur larĝan vojon, suspiris, kiel suspiras laca vojaĝanto, ekvidinte la tegmenton de la propra domo.

— Ruze vi elpensis! — ankoraŭ foje diris Rjabov. — Ĝuste.

— Monon de ili postulu! — prononcis Ievlev. — Kaj pli multe. Marĉandu...

— Certe! Ne sen marĉando...

— Longe marĉandu...

— Ja nepre, tio estas pli certa...

Ili silentis iom. Rjabov diris malgaje:

— Hejme mi preskaŭ ne gastis. Taisja turmentiĝos...

Li balancis la kapon, enpensiĝis.

— Krom vi ne eblas trovi iun, — diris kvazaŭ kulpe

Silvestro Petroviĉ. — Mi pensadis, — ĉu Semisadov-on? Sur la ligna kruro ne povas li. Tie, eble, lukti kaj fuĝi necesos, kaj sur lignaĵo ĉu eblos longe salti? Ankoraŭ Longinov — rudristo bona, sed ne havas saĝan kapon: ĉu vi aŭdis, kiel li en ĉerko la duan alvenon atendadis?

Rjabov ekridis negaje:

— Aŭdis, Silvestro Petroviĉ! Ja ne, ĉi tie eĉ disputo ne povas esti, mi iru, alia ne necesas. Certe, se cerbumi, la laboro estas tia — eblas ankaŭ la kapon perdi, sed ja ĉie estas ne sen malprofito. Se kun ruzo fari, tiam, eble, ni ankoraŭ vivos. Lamenti ne necesas; oni diras, ĝis vespero vi lamentis, kaj sen vespermanĝo restis. Pri morto ni same ne pensu, ĝin ni superruzos. Mi nun pri alio: Taisja ne sciu, ĉu? Sufiĉas por ŝia vivo da malfeliĉo. Nu, se mi ne revenos, tiam nenion eblas fari, sed dume... Kion vi konsilos diri al ŝi?

Silvestro Petroviĉ ŝultrolevis:

— Al malbono Taisja Antipovna ne kredos, pensi necesas — kio estos konvena...

Aliris Ivaĉjo kun la filinoj de Ievlev, alportis ŝipeton, rabotitan el ŝelo. La rudristo prenis el la manoj de la knabo la tranĉilon, korektis la maston, poste streĉis ŝnuron.

— La urbon ili, latronoj, bruligos, se ĝin atingos, — estis diranta Rjabov, — sangegon verŝos, ne eblas ilin lasi atingi Arĥangelskon! Kaj la popolo nenien povas foriri. Ne eblas foriri kun senfortaj maljunuloj kaj etaj infanoj. Granda ruinigo...

— Kaj jen ankaŭ kanonoj estas ĉe mi! — diris Ivaĉjo, almontrante per la fingro la ferdekon de sia ŝipeto.

— Kanonoj estas ĉe li! — diris Venjo.

— Kanonoj! — konfirmis Irenjo.

— Nu, iru, fileto, iru! — ordonis Rjabov. — Iru, promenu!

La infanoj foriris, la rudristo penseme daŭrigis:

— Tiele, Silvestro Petroviĉ. Tiel ni decidos: mi iros malproksime en la maron, renkontos ilin, kvazaŭ hazarde, afektos ĉiel, kaj poste jen — vendiĝos kontraŭ oro. Ili estas tia popolo — ĉion kutimiĝis aĉeti. Nu, kaj se io ne sukcesos — do ĉe ni, blankmaranoj, oni ne vane diras: se fali — tiam en maron, en flakon ja tute ne indas.

Silvestro Petroviĉ volis respondi, ne sukcesis — ektremis la lipoj. Rjabov rimarkis tion. Kvazaŭ hontante pro la malforteco de la kapitan-komodoro, li ekparolis pri alio: en la arestejo sidas majstro de la Kanona korto Forĝisto, oni torturas lin kruele. Sidas sub aresto ankaŭ kelkaj aliaj metiistoj, kial en la nuna malfeliĉa tempo oni homojn turmentas?

Pretere, lamante sur la ligna kruro, iris Semisadov, kaj Ievlev vokis lin, ordonis:

— Vi, ferdekestro, prenu pli saĝajn matrosojn, du dekojn, kaj kun tiuj matrosoj urĝe — en la urbon. Ĉiujn, kiuj en la arestejo sub gardo sidas — liberigu. Al torturitoj, senfortuloj — kuraciston. Al sanuloj — vodkon po granda glaso. Estas tie rabistoj, ŝtelistoj, de la kancelariano per mia nomo severe demandu, — tiujn al laboroj en la urbon. La arestejon — ŝlosi...

Semisadov aŭskultis kun ĝojo, lia granda efelidhava vizaĝo lumis.

— Kaj la torturiston kun la helpanto kien? — demandis li.

— Afero, eble, ankaŭ por ili troviĝos, — respondis Ievlev. — Ili en la urbo laboru — tie ankaŭ nun oni baraĵojn starigas, podiojn, fostojn...

— Indus atenti, ke ilin ne mortigu tie la popolo! — kun subrido diris la ferdekestro. — Hazarde, ĉio povas okazi...

Rjabov demandis rekte:

— Kaj por vi estas domaĝe, ĉu? Nu kaj mortigu por bona sano... Dirite estas al vi: la arestejon ŝlosi...

— Kaj la ŝlosilon — en Dvinon! — gaje, per plena voĉo findiris la ferdekestro.

Li ne povis stari sur la loko, ĵetiĝis plenumi la ordonon, sed Ievlev vokis lin:

— Atendu! La kancelarianojn pro neneceso forliberigu dume, ili iru al siaj hejmoj...

— Nu, Silvestro Petroviĉ! — ekkriis la ferdekestro. — Nu! Diras mi al vi sincere; ne forgesos mi la nunan tagon. Kaj la popolo ne forgesos, pri tio ni zorgos...

— Iru, iru, faru! — ridetante, diris Ievlev. — Iru!

— Eble, ankaŭ mi kun li iros! — tirinte sin, diris la rudristo. — Tempas ankaŭ la hejmon viziti. Ĉu la nemalgranda velboato iros? Ĉu vi kunprenos min kun la edzino kaj Ivano?

Akompaninte la rudriston, Silvestro Petroviĉ ree eksidis sur la benkon apud la preĝejo. Jam venis vespero, sed en la fortreso oni plu laboris, aŭdiĝis egalmezuraj fortaj batoj de marteloj, knaris tabuloj sub pezaj piedoj de portistoj, kiuj estis levantaj sur la nefinitan fortresan muron korbojn kun brikoj.

Kalkule, laŭte, kanonistaj helpantoj estis akceptantaj de velboato kuglegojn, transĵetadis unu al la alia, kriadis:

— Tenu, Simono!

— Ankoraŭ!

— Aĥ, bona pomo!

— Akceptu!..

Apoginte sin sur la bastono per la manoj, metinte sur la manojn la mentonon, Silvestro Petroviĉ plu pensis: li imagis subite, kiel Semisadov liberigas nun el la prizono ĝuste tiun homon, kiu en tiu humida nokto ĵetis al li, Silvestro Petroviĉ, la tranĉilon. Momenta kolero kunpremis la koron, sed li tuj rememoris la desperan viron tiam, en la arbaro, survoje al Ĥolmogoro, kaj pensis, ke ne li juĝu: se sen tio ne eblas, juĝu aliaj. Sed li devas defendi la urbon, kaj kiel defendi, se komenci nun esplori sortojn de elturmentitaj de malfacila vivo masonistoj, terfosistoj, forĝistoj, ĉarpentistoj?

Antaŭ nelonge la vojevodo diris pri oficiroj. Sed kiuj ili estas, tiuj oficiroj?

Silvestro Petroviĉ rememoris Krikov-on, rememoris multajn liajn vortojn. Do, ne riverencema estas Atanazio Petroviĉ Krikov, severa li estas al la vojevodo, al aliaj maljustaĵoj, en kies ajn masko ili estu. Sed tamen ne perfidos la kapitano la standardon, al kiu li ĵuris, ne, ne tia li estas homo, eblas kalkuli je li, eblas lin fidi, kiel sin mem, kiel rudriston Rjabov-on, kiel ferdekestron Semisadov-on, kiel Jegorĉjon kaj Ĥagajon Pustovojtov-ojn. Ne mensogu absurdaĵon princo Prozorovskij! Tio estas plu samaj kalumnioj de damnitaj dungitoj-fremdlandanoj, plu samaj denuncoj, plu sama mensogo. Nu, ili,

amikoj de la vojevodo, sidas nun ŝlositaj, sub forta gardo. Ili sidu ĝis la tempo, ĝis tiu horo, kiam finiĝos tio, kion kun maltrankvilo atendas ĉiuj en la urbo kaj en la distrikto — de infano ĝis maljunulo. Siatempe veturos tiuj fremdlandanoj al si trans la maron. Ne laŭdos oni lin, Ievlev-on, pro tio, ke li arestis la fremdlandanojn, sed kion fari? Alie ne eblas, pro multo oni ne laŭdos! Kaj pro tio, ke li hodiaŭ sendis Semisadov-on ŝlosi la arestejon, same oni ne laŭdos, ne atendu!.. Sed eble, post la viktorio, kiu scias...

Volviĝante en ŝalo, venis Manjo, eksidis apude, demandis:

— Kien Ivano Sabateiĉ ekiris? Taisja mienis kiel mortanto. Ŝajne al amiko en Onegon?

Ievlev, kuntirinte la brovojn, respondis:

— De kie do mi sciu, Manjo? Li pli bone scias...

Manjo frostosenteme movis la ŝultrojn, diris kun riproĉo:

— Li ĵus hejmen revenis — ree li ien bezonas. Eble, vi ordonus al li? Vi estas ĉi tie estro.

— Provu, ordonu! — subridante, respondis Silvestro Petroviĉ. — Li estas ne soldato, ne matroso, — kiel mi lin komandu? Eble, li vin obeos...

Manjo alpremiĝis al lia ŝultro, riproĉis:

— Mokas vi min, mokulo! Kaj kio do estas gaja?

5. En la arestejo

Teodozo Forĝisto, ĉarpentisto Kapulo kaj kupristo Hermilo estis kuŝantaj sur bastomatoj en la vestiblo. La eltorditajn en la unua torturo artikojn la senterulo reartikigis, la alia senterulo

alportis al la prizonuloj supon por manĝi. Teodozo diris kun dolora mieno:

— Por la nuna tago stofo da vodko estus tute bona...

Torturisto Pozdjunin elrigardis el la pordo, demandis:

— Stofo? Vi ja estas de la malnova kredo, kian por vi vodkon?

— Iru for, kanajlo! — respondis Forĝisto. — Iru, ankoraŭ renkontiĝos ni sur arbara pado, ekkonos vi mian tranĉilon!

Pozdjunin palpebrumis, diris kun riproĉo:

— Vi prefere preĝu, ol minacu!

— Mi ja preĝis! — malfacile leviĝante, kriis Teodozo. — Mi ja vian Dion jen kiom spertis, sufiĉas! Kaj vi, kanajlego, min ne instruu, ne ŝoviĝu...

La torturisto foriris, aŭdeblis, kiel li riparas pulion en la torturejo. Forĝisto ree kuŝiĝis, grumblis:

— Dio! Kie li estas, Dio via? Kiom da jaroj mi aĝas — ne vidas mi lin, ne aŭdas, sola stultaĵo — jen kio estas Dio via! Torturisto, ekzekutisto, la manoj en sango ĝis kubutoj — sed preĝas! Kial do la ĉielo ne faŭkas? Ĉu? Kapulo, kial vi silentas?

— Lasu! — konsilis la ĉarpentisto.

— Ne, ne lasos mi! Dio! Scias ni, aŭdis vian Dion. La juĝon atendis, sed kie ĝi estas, la juĝo? Ĉio estas trompo. Kaj kie estas la vero, la justo?

Frapis la pordo: la senteruloj alportis novajn faskojn — por bruligi per fajro. Kapulo fermis la okulojn, por ne vidi,

Hermilo flustre faris preĝon, nur Forĝisto plu estis parolanta:

— Jen ĝi — justo! Faskoj! Kaj Sinjoro rigardos, kaj neniel reagos! Sed en kio do estas peko nia? En la petskribo? Al kiu ni skribis ĝin? Al la caro! Ne, vi atendu...

Li ree ekmoviĝis sur la humida pajlo, kun peno metante la disbatitan korpon, sed sian penson ne perdis.

— Vi atendu! Al la caro? Kaj li estas sanktoleita? Do kiel tio rezultas? Ne, fratoj, mi Dion ankoraŭ ne atingis. Mi lin je la barbo tiel skuos, — li por mi pro ĉio respondos. Li al mi ĉion diros...

— Silentus vi prefere! — petegis Kapulo. — Timas mi!

Forĝisto ankoraŭ longe insultadis Dion, poste senfortiĝis, ekdormetis. Ekdormetis ankaŭ Hermilo kun Kapulo. Pozdjunin ree elŝoviĝis el la pordo, petis Forĝiston ripari al li la feran pulion. Teodozo longe palpebrumadis, ne komprenante, poste tiel longe kaj draste sakris, ke la torturisto nur ojis.

— Ne plaĉas! — diris Kapulo.

— Vi pli proksime aliru, hundaĉa ido, ni vin eĉ ne tiel komunios! — diris Forĝisto. — Aliru, ne timu.

Kaj subite kriis:

— He, fratoj, ni pendigu lin mem, dum fremduloj ne estas! Ĉu ni lin ne superos?

La torturisto ekĵetis rapidajn rigardojn disen, minace levis martelegon en la mano, kankroiris. Forĝisto ŝovis du fingrojn en la buŝon, fajfis, ululis kiel arbara koboldo, Hermilo ŝrikis, kaj tiel terure kaj stride, ke unu el la senteruloj fulmrapide elkuris. Kapulo ĵetis post li argilan kruĉon. La pordo

frapfermiĝis.

— Nun oni katenos nin! — promesis, restariginte la spiradon, Hermilo.

Oni ne katenis, ne sukcesis: anstataŭ dragonoj kun ebria Meĥonoŝin, anstataŭ la kancelarianoj kaj la vojevodo en la torturejon per rapidaj paŝoj malleviĝis la unukrura ferdekestro Semisadov, post li iris liaj matrosoj, en maristaj senmanikaj jakoj, kun sabroj, en trikitaj ĉapoj. Semisadov tenis en la mano peĉan torĉon.

— Elportu ilin, knaboj! — ordonis li per laŭta voĉo.

La kverka pordo al libero estis malfermita, la blindan fenestron unu el la matrosoj elbatis per tortura tenajlo, tra la arestejo ekiris gaja somera trablovo. Pozdjunin ion ekbalbutis, oni ĵetis lin en la malgrandan malhelan kameron. La kanona majstro ne povis stari, iu metis lin sur sian dorson, ekportis supren, en la legomĝardenon, kiun kultivis Pozdjunin — li kreskigadis ĉi tie rafanojn, brasikojn, kukumojn. Post Forĝisto oni elportis ĉiujn, kiuj ne tenis sin sur la piedoj. Kiu povis iel iri mem, tiun oni garde kondukis subtenante sub la brakoj. Forĝiston en la legomĝardeno oni mallevis sur benkon. Li demandis de Semisadov per raŭka voĉo:

— Do kiel? Unuj sur pendigilon levas, aliaj sur la dorso portas? Kiuj do estas kun la justo? Ĉu vi, aŭ tiuj, kiuj pendigadis?

— Vi pli bone vidas! — kun ofendiĝo respondis Semisadov.

— Ja ĝuste ne vidas. Se mi vidus, mi ne demandus. Ordonu en la Kanonan korton min veturigi.

Semisadov sendis por ĉaro, Forĝisto eksidis sur pajlon,

anstataŭ dankon diris:

— Ni eknecesis, tial ili nin liberigis. Kaj se ni ne estus necesaj, ĝis morto ili nin torturus!

La ferdekestro riproĉe balancis la kapon, sed pensinte, konsentis:

— Ja vere!

Pozdjunin-on kaj la senterulojn ili pelis al la kajo — treni trabojn, la kverkan pordon de la torturejo Semisadov mem ŝlosis per peza seruro, la ŝlosilon pendigis sur la kolon, por ne perdi. La matrosoj viciĝis, la ferdekestro komandis:

— Livan supren! Paŝe! Livan — ek!

Ĉe la pordego de la arestejo li diris al la gardanto el rajdistoj:

— Iru vi prefere dormi, kara! Hodiaŭ vi sufiĉe gardis! Iru, frato, dormu dum horo...

La gardanto ne disputis, oscedis, ekiris laŭ la kovrita de lapoj strato.

6. Semisadov

Monaĥoj de la Nikola-Korela monaĥejo, iĝintaj en la fortreso portistoj, vigle leviĝis en siaj tendoj, kie li dormis, kaj sub tamburado eliris al Dvino, al granda malnova barko. Barsanufo, forrazinta la barbon, maldikiĝinta, staris sur la albordiĝejo, glatumadis la lipharojn, skoldante la monaĥojn, ke ili malrapide hastas. Jegoro Rezen eliris antaŭen, per forta voĉo promesis, ke se la portistoj ĝis la mateno sukcesos kun ambaŭ barkoj, estos al ili donita ne malpli ol po duonstofo da brando por du personoj, kaj se ne sukcesos — restos ili en la laboroj

ĝis la vespero. En sufokeco kaj humida varmego de antaŭfulmotondra blanka nokto, en arĝenta nokta lumo la monaĥoj kun korboj, plenaj de ŝotro, per rekta vico ekiris de la bordo al la barko. Barsanufo urĝadis, liaj pipraj ŝercoj sonadis super la kvieta, senmova rivero. En la nokto malproksime aŭdeblis sono de ŝutiĝanta ŝotro, knarado de ponteto, fleksiĝanta sub la piedoj de la portistoj, plaŭdado de remiloj de la velboato, alkondukanta al la bordo la duan barkon.

En la tagmanĝa tempo, kiam kaj sur la Marka insulo kaj en la citadelo laborantoj, forĝistoj, kanonistoj, soldatoj, masonistoj, portistoj, terfosistoj, ĉarpentistoj, kuniĝinte en brigadoj, estis manĝantaj per lignaj kuleroj likvan kaĉon kun fiŝo, ferdekestro Semisadov kaj Silvestro Petroviĉ eliris en malgranda boato sur Dvinon — meti buojn.

Varmege bruligis la suno. Semisadov ligis la kapon per tuko en virina maniero, fumetadis la pipon, per stango mezuradis limojn de la Marka malprofundaĵo, kiu etendiĝis laŭlonge de la tuta Marka insulo, iam eliradis al la ŝanelo, — al la vojo de grandaj ŝipoj.

— Jen bone! Tiel taŭgas! — diradis Ievlev. — Metu, ferdekestro, buon ĉi tien...

Semisadov mallevadis la buon kun ŝnurego kaj fundoŝtono, ĝi malrapide balanciĝadis sur la akvo. Ok buoj markis la malprofundaĵon antaŭ la gardaj ĉenoj. Silvestro Petroviĉ perokule determinis, kiel flugos ĉi tien fortresaj kuglegoj, pafi estos oportune — proksime. La ferdekestro sen scivolemo ĵetadis rigardojn al la kapitan-komodoro, snufante per sia pipeto.

— Kial vi rigardas? — demandis Ievlev.

— Tial mi rigardas, Silvestro Petroviĉ, ke ĝuste ĉi tie ilin dronigi necesas — transverse de la ŝipa iro...

Ievlev ŝajnigis, ke ne komprenas:

— Kion dronigi do?

— Ja la barkojn! — kun ĉagreno respondis Semisadov. — Mi ne estas infano, komprenas, kio por kio estas farata. Sed nur malpli da popolo tion vidu. Hodiaŭ estus bone diservon vespere fari en la fortreso, ĉiujn tien peli, kaj la matrosoj kun ni farus la aferon. Dum ĉiuj dece kantos kaj per la fruntoj al la tero batos — ĉe ni ĉio estos preta...

Tiel ili faris.

Brigadestroj kaj dekestroj kun nekutima severeco ordonis al ĉiuj esti ĉe la diservo. Obstinis la maljuna popeto patro Johano — neniel li povis elpensi, por kio estu la diservo. Ievlev devis eĉ krii al li. La popeto, palpebrumante per la maljunaj okuloj, vestis sin, la diakono-drinkemulo priverŝis sian kapon per malvarma akvo, snufis, ĉirkaŭrigardis, ekiris blovekscitі la incensilon. La fortresa popolo, vestinte sin pli pure, iris amase al la placo, kie estis metita pupitro. Sur la remparo estis bruantaj marteloj. Silvestro Petroviĉ ordonis preni la forĝistojn de la urĝa afero — ankaŭ ili, laborantoj, preĝu hodiaŭ. La matrosoj tiutempe estis sidiĝantaj en siajn rapidajn boatojn, ŝnurante la peze ŝarĝitajn per ŝotro barkojn. Ievlev diris al ili grave:

— La afero, kiun ni faras, estas sekreta. Kiu havas tro longan langon, ni mallongigos, kaj la kapon forigos — ne kompatos. Tamen en ĉi afero je via timo kalkuli mi ne deziras. Je la militista ĵuro mi kalkulas, je tio, ke vi mem scii devas: iras

al ni la svedo, latrono iras...

La matrosoj, starante en la boatoj, estis solene silentantaj. Ievlev krucosignis sin, ordonis dronigi la barkojn. El profundo de la ŝipo aŭdiĝis batado de marteloj — la matrosoj estis trahakantaj la karenon. Sur la dua barko, lamante sur sia lignaĵo, iris Semisadov, ion morne pripensante. Poste li eliris al Silvestro Petroviĉ, diris enigme:

— Nun la buojn ja turni necesas.

— Por kio turni?

— Ja por tio, sinjoro kapitan-komodoro, ke ne la Markan malprofundaĵon ili gardas, sed la ŝanelon.

Ievlev subridis, — ruza estas la ferdekestro. Kaj por ne plu paroli pri la buoj, li rompis:

— La buoj dume staras, ĝis la svedo. Demeti ilin ni ĉiam sukcesos.

Li silente rigardis, kiel malrapide komencis enakviĝi la unua barko. La duan oni dronigis apude. Dum estis farataj tiuj laboroj, dufoje necesis sendi matroson al patro Johano, ke li ankoraŭ preĝu. La popo preĝis pli longe. Kiam ĉiuj finis, Semisadov per raŭka baso demandis Ievlev-on:

— Ĉu fini do la diservon?

— Ŝajne, tempas.

— Ja laciĝis nia popo.

— Laciĝis...

La ferdekestro plu rigardis al Silvestro Petroviĉ. Poste diris mallaŭte:

— Estu trankvila, sinjoro kapitan-komodoro. Neniu diros eĉ vorton. Kaj se mi ion aŭdos — mi mem al tiu hundo la langon plene deŝiros. Ne ŝercas ni nun...

Hejme Ievlev-on atendis Jegoro Rezen — rakonti, kiel novmaniere starigi kanonojn en la baterio.

— Starigu, starigu, — pensante pri siaj aferoj, respondis Silvestro Petroviĉ.

— Sed vi ja min tute ne aŭskultas! — diris Jegoro en la germana. — Vi lastatempe tro multe pensas, sinjoro kapitan-komodoro!

Ievlev plenigis la pipon, bruligis ĝin per braĝo, diris gaje, fiksrigardante la glate razitan, sunbrunan vizaĝon de la inĝeniero:

— Ho, Jegoro-Jegorĉjo, nenion vi, frato, komprenas. Neniegon!

— Kio estas tio — «neniegon»? — ĝojante pri la gajo de Ievlev, demandis Rezen.

— Kanonoj! — ekkriis la kapitan-komodoro. — Mortiroj! Haŭbizoj! Ĉu en ili estas la ĉefa afero, amiko mia bona? Kanonojn ni konas, sed la popolon nian — kanonistojn, soldatojn, aliajn ceterajn — ĉu konas? Ne, ne konas, Jegoro. Ĉiam ni al kanonoj esperas.

Kiam Rezen foriris, Silvestro Petroviĉ trairis la ĉambron, malfermis la fenestron, aŭskultis glatan bruon de laboroj en la fortreso.

Do, nun venu la svedo! Ni renkontos kiel necesas!

Ĉapitro tria

Venas-kuras el trans maro blua
Nigraj ŝipoj, ŝipoj tri.

Kanto

1. Iras ŝipoj

En frua mateno la 14-an de julio de la jaro 1701 subadmiralo grafo Gyllenstierna donis ordonon al la ŝipoj de la eskadro ĵeti ankrojn apud insulo Sosnovco, en la gorĝo de la Blanka maro. Sur la pobferdekoj ritme ekbatis tamburoj, ekkantis signalaj klarionoj. Nemalproksime maraj ondoj estis batiĝantaj al la morna, ŝtona bordo, diafana fumeto estis leviĝanta super fiŝista setlejo.

Sur la eskadro komenciĝis urĝaj laboroj: la kanonajn paftruojn la subadmiralo ordonis fermi plene, ŝipaj ĉarpentistoj alnajladis laŭ la ŝiprandoj lignajn skulptitajn girlandojn el floroj, folioj kaj gajaj homaj vizaĝoj. Kupraj kaj feraj kanonoj sur la supra ferdeko estis kovrataj per tegoj, lerte konstruitaj el malplenaj bareloj, falsaj sakoj kaj korboj. Sur la pobferdeko de la flagŝipo «Krono» Gyllenstierna ordonis meti du kestojn, altajn je homo, por ke tie eblu kaŝi sturmajn soldatojn, pretajn al pafado. La antaŭaj septoj de ambaŭ kestoj povis momente defali antaŭen, sesdek soldatoj kun mallongaj fusiloj povis eliri en tri vicoj sur la ferdekon, pretaj por batalo.

Soldatojn, destinitajn por batalo en Arĥangelsko, ekzercadis kolonelo James. En minutoj de ripozo li, ne avarante vortojn, rakontadis pri riĉaĵoj de la blankmaranoj. La okuloj de la

soldatoj avide brilis.

En norvega urbeto Tromsø ŝipanaroj de la ŝipoj de lia reĝa moŝto sukcesis iomete rabi la loĝantaron. Grafo Gyllenstierna eksciis pri tio, sed eĉ vorton ne diris al la ŝipestroj de la eskadro. Kaj la dungitoj komprenis: ĉiun, kiu deziros, atendas vera riĉo tie, en Moskvio.

Ili rabadis ankaŭ survoje al la gorĝo de la Blanka maro: haltigadis norvegajn ŝipojn, forprenadis peltojn, fiŝon, monon, vodkon. Ili prirabadis fiŝistajn setlejojn. Ĉi tie eblis ĉio, nenio estis malpermesata, ĉi tie al Benkt Murdis Amikon ne plu minacis pendumilo, ĉi tie Ŝvabrilo povis murdi senpune. En poŝoj de matrosaj pantalonoj tintadis oro, sur kanonaj ferdekoj oni drinkis brandon kaj vodkon, pasie ludis ĵetkubojn.

La flagoj sur la ŝipoj de la eskadro en Tromsø estis anstataŭigitaj, la subadmiralo ordonis al la navigistoj elporti el la kajutoj la sigelitajn sakojn, en kiuj konserviĝis tukoj de Nederlandaj, Angliaj, Bremenaj standardoj. Kun ĉiu horo la milita ŝiparo pli iĝadis simila al trajno de pacaj negocistaj ŝipoj.

La oficiroj de la eskadro demetis la uniformon, kaj la spadojn ĝis la tempo fordonis al la ŝipaj armilistoj. Por rabado restis tranĉiloj kaj pistoloj, tio estis sufiĉa.

Gyllenstierna mem, vestita en varma holanda kaftano, nun havis aspekton de maljuna negocisto, per kio tre gajigis sian edzinon Margret-on. Sed la admiralo, rigardinte al si en spegulo, eĉ ne ridetis. Li nur kunpremis la lipojn kaj foriris el la kajuto morna.

Kiam ĉiuj laboroj finiĝis, grafo subadmiralo faris inspekton

de la eskadro kaj propramane punis nur du matrosojn. Tio signifis, ke li estas tre kontenta. Nun, kiam la ŝipoj aspektis pacaj negocistaj ŝipoj, eblis komenci serĉi piloton.

Vespere de la flagŝipo «Krono» deiris sesremila gigo. Ĉe la rudro sidis la hispana ferdekestro Álvarez del Robles, ĉe la remiloj — silentemaj sobraj kaj fidindaj knaboj, sub la ĉemizoj kaj kamizoloj de ĉiu el ili estis kaŝita po paro da bonaj pistoloj kaj po bona tranĉilo. Sed la fiŝista setlejo kvazaŭ formortis. La fumeto ne plu leviĝis super domoj de rusaj fiŝistoj, nur kriis mevoj kaj bojis al la venintoj hundo kun griza muzelo...

La ferdekestro eniris en kabanon, disŝovelis cindron, sub la cindro ankoraŭ bruletis braĝo. Nefinmanĝita supo staris sur lama tablo. Álvarez del Robles kunpremis la sekajn lipojn: la fiŝistoj fuĝis, la akiraĵo foriris el la manoj.

Por ajna okazo li kun siaj knaboj trairis la tutan insulon: nenie estis eĉ unu homo, sed flanke de la Sosnovska markolo, apartiganta la insulon disde la bordo, la ferdekestro ekvidis finbrulantan lignofajron, kaj poste ankaŭ barkojn de rusaj pomoroj. La rusoj foriris el ĉi tie tute antaŭ nelonge, sed atingi ilin estis jam malfrue.

— Mi neniam vidu miajn infanojn, se la moskvianoj ne trompis nin! — diris la ferdekestro. — Sciigo pri niaj ŝipoj antaŭis nian eskadron. Tamen, Dia favoro estas kun ni. Ni esperu al pli bona...

Antaŭ nokto la fregato kaj la jaĥto levis la ankrojn kaj ekiris krozi, por interkapti iun fiŝistan ŝipon, sur kiu povus troviĝi piloto. Al leŭtenanto Brems fortunis: li altrenis trimastan rusan barkon kaj du grandajn velboatojn, kiuj iris al fiŝkaptado.

Grafo Gyllenstierna ordonis meti sur la pobferdekon tablon kun bona regalo kaj afable, kiel malnovan kaj bonan konaton, akceptis la rudriston — grizharan denskorpan viron kun atenta kaj ruza rigardo.

La rudristo, antaŭ ol drinki, krucosignis sin, drinkinte — laŭdis la brandon, ke ĝi estas sen aĉa odoro, de duobla, ŝajne, rektifiko. Li almanĝis per peceto de vianda flano, interesiĝis, kia estas nomo de la ŝipestro. La subadmiralo pensis, sulkigis la vizaĝon, nomis sin negocisto Shebald.

— Nu, kaj mia nomo estas Nilo Demetrieviĉ Longinov! — diris la rudristo. — Do, ni estu konataj. Ĉu vi iras komerci?

La subadmiralo, abomene mienante, sciigis, ke li komercas per vitro, tranĉiloj, vino, sekvinberoj, pipro, — sed jen, al li malfortunis, en la Blankan maron li ne iradis, kiel iri en Dvinon, li ne scias.

Okke Lepora Nazo, starante malantaŭ la fotelo de la subadmiralo, estis tradukanta.

— Multajn ŝipojn vi havas! — ne respondante al la demando de la subadmiralo, diris la rudristo. — Jen kiaj grandaj! Riĉe vi komercas. Eble, eĉ domon propran vi havas trans la maro, bienon, ĉu bone vivas? Jen kiom da varo...

— Sinjoro ŝipestro atendas respondon al sia demando! — diris Okke.

Loginov pensis, poste trankvile konsilis iri ĝis la Dvina buŝo, — tie la doganejo mem, post leĝa pririgardo de la ŝipoj, sendos spertan piloton. Tiel ĉiuj faras, ankaŭ sinjoro ŝipestro devas fari same.

— Mi ne bezonas doganejon! — seke diris la subadmiralo.

— Mi ne bezonas piloton tie. Mi bezonas piloton ĉi tie!

La rudristo demandis simplanime:

— Sed por kio ĉi tie? Ĉu vi mapon ne havas?

Al subadmiralo tedis tia ludo. Turniĝinte al Okke, li diris abrupte:

— Demandu lin, ĉu ne kondukos li kontraŭ bona pago la ŝipojn ĝis urbo Arĥangelsko. Komprenigu la malĝentilulon, ke okaze de rifuzo lin atendas terura morto. Kaj pli rapide...

Okke tiris la nazon, ekparolis, la rudristo aŭskultis atente, liaj fortaj makzeloj estis maĉantaj la viandan flanon.

— Nu? — demandis la subadmiralo.

— Li pensas! — respondis Okke.

— Li pensu pli rapide! — ordonis Gyllenstierna.

Longinov bedaŭre suspiris, mensogis, ke konduki la eskadron li neniel povas: li mem estas ne el Arĥangelsko, devenas el Onego, laŭ la Dvina ŝanelo ne iradis.

— Pri la puno vi diris? — demandis Gyllenstierna.

— Jes, *herre* subadmiralo.

— Kaj kio?

— Li respondas, ke ĉio estas en la mano de Dio...

Gyllenstierna ordonis forkonduki la rudriston kaj sidigi en la ĉenkeston. La matrosoj silente ligis al la rusa viro la manojn malantaŭ la dorso, la ŝipa forĝisto nitis katenojn sur liaj piedoj. Oni alpelis aliajn rusojn — de la velboato kaj de la barko. La fiŝistoj iris trankvile, sed ekvidinte la rudriston, haltis, interrigardis. Unu demandis:

— Do, ĉu bone vi gastis, Nilo Demetrieviĉ?

— Bone! — respondis Longinov. — Gardu vin, knaboj. Svedoj! Ne obeis ni la ukazon — en la maron ne iri, nun necesas teni nin.

Matroso kun orelringo peze batis la rudriston al la dorso, tiu, ne retrorigardante, ekiris per etaj paŝoj de la katenitaj piedoj. La subadmiralo mallarĝigis la okulojn al la rusaj fiŝistoj, suĉante la pipon. Ili staris en liberaj pozoj — iu ŝovinte la manon sub la zonon, iu elmetinte la piedon antaŭen, iu entute ne rigardis al la subadmiralo.

Malantaŭe al la grafo aliris ŝipestro Urquhart, diris per dolĉa voĉo, ke kun tiuj ĉi homoj fari ceremoniojn li ne konsilas: ilin necesas pendumi antaŭ la okuloj de aliaj, tiam, eble, iu iĝos pli konsentema. Grafo Gyllenstierna fermis la nekutiman, kun lanuga subŝtofo kaftanon, prenis de la pleto tason da kafo, kiun alportis Jakobo...

— Diru al ili, — ordonis Gyllenstierna al Okke Lepora Nazo, — diru, ke tiu, kiu konsentos konduki nian eskadron al urbo Arĥangelsko, iĝos riĉa homo. Kiu ne konsentos — estos ekzekutita...

Okke tradukis.

La rusoj interŝanĝis rigardojn. Kopilov, nejuna rudristo kun severa rigardo, en trikita jako, en fiŝistaj botoj, subridis:

— Ĉu vi freneziĝis? Tie oni kontraŭ la svedo sin gardas, ĉu ili lasos pasi? Sur la tuta Dvino por gardo kontraŭ la svedaj latronoj estas kanonoj metitaj, karonadoj[113], mortiroj, — oni dek fojojn dronigos, antaŭ en la buŝon eniri...

113 Karonado — speco de kanono kun mallonga tubo *(trad.)*

Okke ĵetis timigitan rigardon al la admiralo, tradukis delikate, mildigante la krudecon de la ruso. Jakobo, tenante la pleton, sendeŝire rigardis al la fiŝistoj: jen kiaj ili estas, simplaj rusaj homoj!

La subadmiralo glutis kafon, ordonis traduki al la fiŝistoj, ke li donas al ili por pensado ekzakte dek minutojn. Oni alportu ĉi tien dekminutan sablohorloĝon, la navigisto havas tian.

Urquhart palpebrumis al Okke, tiu, svingante la manojn, ekkuris en la navigistan kajuton, revenis anhelante, renversis la horloĝon, la sablo ekŝutiĝis per maldika strieto. La rusoj rigardis al la sablo, nehaste interparolante, kaj iliaj vizaĝoj estis trankvilaj.

— Vere, ne indis en la maron iri! — diris unu, sunbruna, kun lanugo sur la supra lipo, tondita ronde. — La heroldo kriis ĝuste, vere estas svedoj...

— Indis, ne indis! — respondis alia. — Manĝi la ventro ja petas, jen kio estas malbona. Sen maro kiel nutri sin...

Tria — maljunuleto kun gaja brilo en la okuloj — diris moke:

— Longinov ja Nilo Demetrieviĉ ĉe la tablo sidis, sed al ni oni ne verŝas. Ne, koleriĝas la olda hundo; vidu, iradas. Iradu, iradu, nemulton vi ricevos...

La junulo ekridis, kovris la buŝon per la polmo. Poste diris serioze:

— Ni ŝercas, sed la avo estas kolera. Povas esti, ke ni vere niajn vivojn finos ĉi tie...

La sablo plu ŝutiĝis — per maldiketa orkolora strieto. Kun

krioj, oblikve, sur disetenditaj flugiloj rapidis al akvo mevoj. La svedaj matrosoj ĵetadis mornajn rigardojn al la rusoj. Grafo Gyllenstierna nelaŭte demandis de Okke:

— Pri kio ili parolas?

— Ili pensas, kiel agi! — singarde respondis Okke.

— Ili komencos pensi post kiam ni pendumos duonon de ili! — diris ŝipestro Urquhart. — Mi scias, kia estas tiu popolo!

Gyllenstierna strabis al la ŝipestro kaj ordonis voki ŝipan ekzekutiston. Larĝŝultra malalta matroso kun eltorditaj piedoj rapide ekgrimpis sur la maston — meti maŝon sur jardon. El luko nehaste, oscedante en pugnon, eliris ekzekutisto Svante Bagge, — en ruĝa pinta ĉapo, kun nudaj harkovritaj brakoj.

— Kiun? — demandis li, pririgardante la rusojn.

— Ĉiujn, komencante de la plej juna! — ordonis Gyllenstierna. — Kaj pli rapide!

Svante Bagge kriis al la matroso, ke tiu malĝuste metas la maŝon, la matroso korektis kiel necesas. La sablo transŝutiĝis tuta el la supra ujo en la malsupran. Matrosoj — Kristofero, Bill Hartwood kun orelringo, Ŝvabrilo — aliris al la plej juna ruso. Ŝvabrilo per gestoj ordonis al li demeti la kaftanon. Okke haste tradukis:

— La veston demetu, homo, la veston...

La ruso ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ perplekse, lia sunbruna vizaĝo iĝis tute infana, li depuŝis Ŝvabrilon, diris kolere:

— Ĉu vi freneziĝis? Pro kio do pendumi?

— Mi atendas! — diris Svante Bagge.

La maljunulo eliris antaŭen, ŝirmis per si la junulon, frapis sin per la pugno al la kava brusto, diris al Ŝvabrilo malrapide, dise, kiel al surdulo:

— Min por komenco! Li estas juna! Min faru!

Li krucosignis sin per tremanta mano, riverencis al la siaj malalte, petis:

— Pardonu, knaboj, se io estis...

La fiŝistoj morne silentis, la maljunulo aparte riverencis al rudristo Kopilov:

— Pardonu ankaŭ vi...

Kaj flustris:

— Kial vi fostas, stultuloj! Saltu en akvon, naĝu! Mi ne sukcesos, sed vi estas ne maljunaj, sanaj, dum ili rekonsciiĝos — jen kie vi estos... Pendi sur pendumilo ne estas granda honoro...

Kopilov prenis la maljunulon je la ŝultroj, rigardis en liajn okulojn, kisiĝis kun li trifoje. La maljunulo ankoraŭ flustris:

— Mi ilin nun kolerigos, kaj vi faru kiel mi diris. Nu, adiaŭ!

Li malbutonis sur la kolo trivitan kolumon de la ĉemizo, mem, lerte paŝante per la maldikaj piedoj, ekiris al la balanciĝanta maŝo, per la senkoloriĝintaj okuloj ĉirkaŭrigardis la malafablan bordon de la insulo, la griz-verdan maron, la vizaĝojn de la svedaj matrosoj, vicigitaj ĉe la randoj de la flagŝipo. Li ree krucosignis sin kaj diris per laŭta kolera voĉo:

— La ŝanelon ĝis la urbo Arĥanĝela mi scias, sed ne kondukos! Kaj ne trovos vi, latronoj, tian homon sur nia tero, kiu kondukus viajn ŝipojn, ne trovos judason. Jen, jen!

Li kunmetis el la fingroj spitsignon, etendis ĝin al Gyllenstierna, mem enŝovis la kapon en la maŝon, elbatinte per la piedo la benkon.

Ekzekutisto Svante Bagge ektiris per la tuta korpo la kanaban ŝnuron, ŝrike ekknaris la pulio. Grafo Gyllenstierna diris al ŝipestro Urquhart:

— La pulio ne estas ŝmirita, skurĝu la kulpulon!

En tiu momento eligis teruran krion matroso Ŝvabrilo. Grafo Gyllenstierna turniĝis al la krio kaj ekvidis, ke la rusoj, destinitaj al ekzekuto, disĵetinte la matrosojn, saltas en akvon. Matroso Hartwood estis tordiĝanta sur la ferdeko, matroso Ŝvabrilo kriis en akvo.

— Pafu! — komandis Urquhart. — Pafu al la fuĝantoj!

Sed dum sur la ferdekon elkuris soldatoj kun fusiloj, dum ili komprenis, al kiu necesas pafi, pasis tro multe da tempo. Pafoj tondris vane, du fiŝistoj jam elgrimpis sur ĉebordajn ŝtonojn, la ceteraj estis alnaĝantaj al la bordo.

— Al tiuj, kiuj perdis la rusojn, po tridek skurĝobatojn por ĉiu! — ordonis Gyllenstierna al ŝipestro Urquhart. — Eble, ili iĝos pli saĝaj kaj komprenos, en kian landon ni iras. Damnitaj gapuloj! Skurĝi senprokraste, tuj!

2. Ni akceptos ilin kiel gastojn!

Baldaŭ en la eskadro oni rimarkis ankoraŭ iun fiŝistan ŝipon. «Dia sonorado» impetis atingi ĝin.

Leŭtenanto Johan Morat ordonis ludi artilerian alarmon, kanonestroj, finmanĝante la tagmanĝan salviandon, ekkuris al

siaj kanonoj. La artileria oficiro fajfis per korna fajfilo trifoje, tio signifis: pafu nur la prua kanono, la ceteraj estu pretaj. La kanonestro enpremis la meĉobastonon en la fuzeon, la prua kanono pafis, sur grizaj ondoj obtuze tondris la pafo. La velboato plu estis foriranta.

— Li nemalbone boardas! — diris Johan Morat.

La artileriisto kriis al la kanonestro:

— Ŝargu!

Kaj poste:

— Pafu!

La kanono batis duan fojon. Estis videble, kiel la kuglego kovris per ŝprucoj la pobon de la rusa ŝipeto. Leŭtenanto Morat minacis per la pugno al la kanonestro. La artileria oficiro mem kuris al la kanono, depuŝis la kanonestron, komencis per levstango mallevi la kupran kanontubon. La tria pafo, evidente, vere timigis la rusajn fiŝistojn, ili malhisis la velojn. Nun ilia ŝipeto estis senhelpe balanciĝanta sur la akvo.

Morat ordonis al tamburisto bati atakan alarmon. «Dia sonorado» premis la velboaton per la maldekstra flanko, soldatoj en feraj brustokirasoj, kun kurbaj tranĉiloj en la manoj, komencis salti malsupren — sur fiŝistajn retojn, sur sakon da sekala faruno, sur senartifikajn provizojn, kunprenitajn de la fiŝistoj en la maron. La matrosoj per hokoj tenis la fiŝistan ŝipon strikte ĉe la ŝipflanko, Morat mem malleviĝis sur la velboaton. Da kaptitoj estis nur du. La leŭtenanto ne kredis, mem plonĝis en la malgrandan kajuteton, kie sur la tablo li trovis libron pri navigarto. La libro mirigis lin, li demandis pri ĝi la pli aĝan fiŝiston:

— En kies kapon venis ideo studi navigarton?

La pli aĝa ne komprenis, la malpli aĝa respondis en bona germana lingvo:

— Tio estas mia libro. Redonu ĝin al mi.

— Ĉio dependos de tio, kiel vi kondutos poste! — prononcis leŭtenanto Morat.

Kaj ordonis meti sur la kaptitojn ĉenojn kun braceletoj sur gorĝo kaj sur manoj. Ambaŭ fiŝistojn oni transirigis sur «Dian sonoradon», la velboato estis dronigita. Plie en tiu tago ili sukcesis kapti neniun, kaj la leŭtenanto ordonis iri al Sosnovco, kie staris la eskadro.

En nebula arĝenta krepusko de blanka nokto jam el malproksime videblis pendumita sur masto de la flagŝipo rusa fiŝisto. La leŭtenanto miris — kial nur unu? La artileriisto de «Krono» Plomgren kun malgaja rideto diris, ke la ceteraj fuĝis.

— Kiel fuĝis?

— Tre simple — fuĝis. Komencis salti de la rando en la akvon dum la ekzekuta rito. Álvarez del Robles ĝis nun serĉas ilin sur la insulo, sed apenaŭ trovos...

— La insulo estas malgranda! — diris Morat. — Ne trovi ne eblas...

Plomgren kun dubo balancis la kapon:

— Tio estas kuraĝaj uloj, Johan. Fuĝante, ili frakasis la kapon al matroso, kaj alian puŝis en la akvon. Dum ni estis mallevantaj savboatojn, la fuĝantoj jam estis sur la insulo.

— Kion diras la subadmiralo?

La artileriisto svingis la manon.

Morat reĝustigis sian kaftanon, tuspurigis la gorĝon; tenante la ĉapelon en la mano, li frapis al la pordo de la flagŝipa kajuto. La subadmiralo per grandaj paŝoj estis iranta el angulo en angulon, sinjorino Gyllenstierna, tuta en rozkolora vesto, sidis kun la piedoj en la fotelo. La fenestroj kaj la pordoj al la galerio estis malfermitaj, post la pobo de la ŝipo estis obtuze bruanta la maro.

— Nu? — demandis Gyllenstierna.

La leŭtenanto raportis, ke li sukcesis kapti fiŝistan velboaton, sur kiu, laŭ lia opinio, estis irantaj du spertaj maristoj.

— Kial vi opinias ilin spertaj? — demandis la subadmiralo.

Morat metis sur la tablon la libron, kiu estis en la velboato. En la okuloj de la admiralo brilis scivolemo.

— Se simplaj fiŝistoj legas naviglibrojn, — prononcis la subadmiralo, — tiam trioble pravas lia reĝa moŝto, sendante ĉi tien nian ekspedicion... Al la moskvianoj, konstruantaj floton, tempas meti finon por ĉiam...

Li enpensiĝis.

Sinjorino Gyllenstierna sidis en la fotelo, ŝiaj okuloj estis moke mallarĝigitaj.

Leŭtenanto Morat silentis.

En la triklapa pordo, kondukanta al la galerio, aperis kolonelo James en pudrita peruko, kun muŝo ĉe la buŝo, langvora, orgojla.

— Sur la insulo oni pafas! — diris li. — Necesas esperi, ke

nia del Robles kaptis la ulojn.

— Estas tre probable, ke ili kaptis lin! — diris Margret el sia angulo.

— Kiuj — ili? — demandis la admiralo.

Sinjorino Gyllenstierna ekridis.

— Tiuj, kiuj kaŝiĝas sur la insulo.

— Mi pensas, ke ĉio ĉi estas ne tro gaja! — prononcis kolonelo James. — La sinjorino ŝercas, sed ni ne ridas...

— Antaŭ nelonge vi parolis pri la ekspedicio al Arĥangelsko kiel pri amuza vojaĝo, — diris Margret. — Kiel do mi ne ridu? La eskadro de lia reĝa moŝto ne povas superi dekduon da simplaj kampuloj...

Ŝi ekstaris — alta, bela, svelta; fleksinte la brakojn, ŝi korektis la harojn, poste, mallarĝigante la okulojn, demandis de James:

— Ĉu vi pensas, ke estas ne tiel?

James ŝultrolevis, ne sciante, kion respondi. Sinjorino Gyllenstierna ekparolis moke:

— Eble, estas tempo ĉesi timigi ilin? Ili estas ne tro malkuraĝaj — tiuj rusaj muĵikoj, pri kiuj en Stokholmo firmiĝis opinio kiel pri malsaĝa grego. Ĉu vi ne rimarkas, ke la morto ne terurigas ilin? Tiu rusa maljunulo, kiu ĝis nun balanciĝas sur la jardo, ne timis la ekzekuton, ĉu vere? Do, necesas promesi al ili tian rekompencon, ke al ili turniĝu la kapoj! Ho Dio, mi tute komprenas mian edzon grafon Gyllenstierna-n — al li ne povas esti agrable babili kun rusaj kampuloj, sed se ne ekzistas alia rimedo por atingi la deziratan,

kial ne babili kun ili? Necesas superi sin. Ni staras sur ankro dum dua tagnokto, sed kia estas rezulto? Ĉu ni estos pli proksime al Arĥangelsko, se pendumos ankoraŭ dekduon da moskvianoj? Sed ni ja iras en Arĥangelskon, nia celo estas Arĥangelsko, kaj nur Arĥangelsko.

Ŝiaj okuloj renkontiĝis kun la okuloj de la edzo, la pupiloj de la subadmiralo malvarme brileris kaj estingiĝis. Margret forturnis sin.

— Ni aŭskultas vin, sinjorino! — diris James.

— Kaj tiu ĉi maskerado! — ekkriis Margret. — Por kio ĝi? Subadmiralo kaj oficiroj de la floto de lia reĝa moŝto devas esti kun spadoj, nur tiam ili faros necesan impreson al rusaj kampuloj, sed tiel, sinjoroj, vi estas simple ridindaj. Rigardu al vi, kolonelo James! Al kiu vi similas en vesto de negocisto?

La kolonelo rearanĝis sur si la kaftanon, diris milde:

— La sinjorino sendube pravas. Ni ankoraŭ nenion faris, sed la rusoj jam vidis nin kaj senpune foriris el la insulo, por averti la siajn...

— Por mi ne estas klara, tamen, la esenco de via penso, Margret, — prononcis la admiralo. — Mi komprenas, ke vi laciĝis pro la vojaĝo kaj havas deziron kiel eble plej baldaŭ paŝi sur firman teron de urbo Arĥangelsko, sed kion ĝuste vi konsilas?

En la voĉo de la edzo sinjorino Gyllenstierna kaptis multsignifajn intonaciojn kaj por momento konfuziĝis.

— Aĥ, ĉu ne estas egale! — eviteme respondis ŝi. — Ĉi tie ĉiuj agos laŭ sia deziro, mi ja scias. Vi pendumados, pafados, ree pendumados! Poste via ekzekutisto elpensos novan

torturon. Eble, vi pravas, — mi, certe, nenion povas konsili al vi...

En ŝia voĉo aŭdiĝis larmoj.

— Sendube, la sinjorino estas lacigita de la vojaĝo, — kun suspiro diris James.

— La sinjorino deziras pli baldaŭ trafi en Arĥangelskon! — per ligna voĉo rimarkis Gyllenstierna.

La pordo malfermiĝis, la adjutanto raportis, ke de la bordo venis del Robles. La hispano eniris konfuzita, liaj buŝo, mentono kaj kolo estis ligitaj per sanga ĉifono.

— Nu? — demandis Gyllenstierna,

— Malbone, *herre* subadmiralo! — malklare diris del Robles.

— Kio estas malbona, diablo vin prenu?

— Ili ŝiris mian buŝon! — aŭdiĝis el sub la ĉifono.

Sinjorino Gyllenstierna kun abomeno movis la ŝultrojn, foriris trans la septon. Tuj iĝis aŭdeble, kiel ŝi kantetas tie: «Pompe, fidela servisto de l' reĝo...»

— Ili sidis en groto... — estis balbutanta la hispano. — Tio estas diabloj, sed ne homoj, *herre* subadmiralo. Ni ne sciis, ke la groto havas alian elirejon. Kaj kiam kugloj kaj pulvo al ili elĉerpiĝis, ili komencis bati nin per ŝtonoj. Sed tio ankoraŭ ne estas malfeliĉo, malfeliĉo estas en tio, ke tie ili estas tre multaj. Tie kaŝiĝas ne nur la fuĝintoj, kondamnitaj al pendumo, tie kaŝiĝas ankoraŭ iuj kreaĵoj... Ho, Dio mizerikorda, mi ne scias, ĉu estas mortintoj inter ili, sed ni perdis kvar bonajn matrosojn...

— Kvar! — ekkriis la subadmiralo.

— Kvar! — konfirmis la ferdekestro.

— Ankoraŭ ne komencinte la aferon, ni perdis tiom da homoj! — diris kolonelo James. — Tio estas tre malbona, ferdekestro...

— En la ŝipanaroj cirkulos diversaj onidiroj! — suspiris leŭtenanto Morat. — Tio estas tre danĝera...

— Vi povas iri, leŭtenanto! — diris Gyllenstierna. — Mi ne retenas vin...

Morat foriris.

— Ni perdis kvar, — per kulpa voĉo balbutis del Robles. — Sed ĉu ni povis preventi la malfeliĉon? Kiam ili iris al nia ariero, kelkaj el ni perdis spiritĉeeston, kaj okazis tiel, ke la fiŝistoj ekposedis du tranĉilojn kaj muskedon...

— Ĉu sen pulvo kaj kugloj? — demandis James.

— Ne, tiu muskedo estis ŝargita...

— Mirinda koincido! — diris el trans la septo sinjorino Gyllenstierna.

La pupiloj de del Robles kolere brileris, sinjorino Gyllenstierna eliris el la dormoĉambro, demandis moke:

— Per kio do tio finiĝis?

La ferdekestro silentis, mallevinte la okulojn.

— Iru for! — diris la subadmiralo.

— Mi mem iros sur la insulon! — diris kolonelo James. — Vere, la sinjorino pravas. Ni iĝas ridindaj...

La subadmiralo abrupte turnis sin al la kolonelo, diris

venene:

— Vi devus fari tion iom pli frue. Ĉu vi vere pensas, ke ili estas tiom stultaj — sidas kaj atendas novan taĉmenton? Trans la markolo estas setlejo, el la setlejo oni certe sendos por ili boaton...

— Jes, sed la setlejo estas senhoma! — kontraŭdiris James.

— Por ni, tempas kompreni, ke nur por ni...

Gyllenstierna malfleksiĝis sur la dorson de la fotelo, ekparolis malmilde:

— Oni konduku ĉi tien la fiŝistojn, kaptitajn de leŭtenanto Morat. Ni parolos kun ili alie, ol parolis ĝis nun. Estu primetita tablo, ni akceptu ilin kiel gastojn, diablo prenu tiujn obstinulojn. Ni persvadados ilin, ni drinkos kun ili, kaj se mi tro laciĝos, tiam anstataŭ mi daŭrigos la konversacion vi, *herre* James. Oficiroj ludu liutojn, kaj sinjorino Margret, eble, kantos al ni. Kial ŝi ne kantu, ja ŝi kantos, por trafi al Arĥangelsko. Ĉu vere, Margret?

Sinjorino Gyllenstierna ne respondis: la admiralo estis iĝanta maldiskreta. Tamen, ŝi pardonis lin — la ekspedicio estis malfacila.

— Post ne pli ol horo ĉi tie kunvenos la tuta plej bona kompanio de la eskadro! — diris la subadmiralo, leviĝante. — Mi bezonas ripozon. Mi fartas ne tro bone...

Restinte sola, sinjorino Margret sonigis la sonorileton kaj ordonis al Jakobo primeti tablon por vespermanĝo. Jakobo foriris. La ĉambristino-negrino alportis nigran robon kun perlaj kudraĵoj. Vestante sin, la sinjorino parolis:

— Ho Dio, kia enuo. Estas rare enue! Ĉiuj ĉi oficiroj estas malĝentiluloj kaj drinkuloj, de ili certe ne eblas atendi ion bonan. Se doni al ili liberon — ili nur drinkus. Kaj kolonelo James estas simple kaduka ruino. Li farbas la vangojn kaj nigrigas la brovojn. Krome li, ŝajne, estas ankaŭ iom malkuraĝa...

La ĉambristino nevole tro forte strečis ŝnureton de la korsaĵo, sinjorino Gyllenstierna pinčis ŝin per la rozkoloraj ungoj, diris kaprice:

— Streče!

Al la pordo oni frapis.

— Kiu estas tio? — demandis Margret.

— Tio estas ni, sklavoj de sinjorino Gyllenstierna! — prononcis voĉo de artileriisto Plomgren.

— Ĉu jam pasis tuta horo? — demandis sinjorino Margret.

— Por mi pasis jaro! — ekkriis el trans la pordo la artileriisto.

— Pli ol jaro! — konfirmis Morat.

— Pasis tuta jarcento! — per voĉo de mortanto prononcis galanta Brems.

Vestinte sin, ŝi permesis eniri. Ili riverencis tre malalte kaj eksidis apud la klaviceno, por agordi siajn liutojn. Sinjorino Gyllenstierna če la spegulo estis surmetanta braceletojn.

— Kion ni hodiaŭ festas? — flustre demandis Olof Brems.

— Probable, ni faros funebran festenon pri tiuj kvar matrosoj! — same flustre respondis Plomgren. — Kaj eble

ankaŭ pri ni mem... Niaj aferoj iras ne tro bone...

— Nur unu aferon mi nun scias firme, — prononcis apenaŭ aŭdeble Johan Morat. — Kiam mi maljuniĝos — eĉ Satano mem ne devigos min edziĝi al junulino!

Li ekridis kaj, tuŝinte la kordojn de la liuto, ekkantis:

Ŝipon pelas la vent' oceana,
Di', indulgon al mia anim'...

3. Marĉando kaj interkonsento

En la ĉenkesto estis sufoke, odoris je kanabfibroj, je ratoj, kiuj sentime bataladis kaj pepadis sub la piedoj. Maldekstre, trans septo, per krudaj voĉoj estis parolantaj matrosoj, unu insultadis, alia lin humiligadis, poste aŭdiĝis rido, frapado de ĵetkuboj.

— Ĉu en la sveda ili parolas? — demandis Rjabov Demĉjon.

— Diverse! — diris Demĉjo. — Unu en la sveda, kaj alia estas anglo. Kaj ankoraŭ unu — eble holandano...

— Po paro da ĉiu kreaĵo! — subridis Rjabov.

Ili ree eksilentis por longe. Demĉjo ekdormetis, tremerante dum dormo, flustrante iajn vortojn. Rjabov pensadis. Du ratoj kun pepo trakuris sur lia kruro, li tremeris, ree enpensiĝis. Estis aŭdeble, kiel la matrosoj per hurlantaj voĉoj komencis kanton. Demĉjo tute vekiĝis, eksidis sur ŝnurega volvaĵo, demandis:

— Kio do nun estos, oĉjo?

— Tio, frato, estos, ke vane vi kun mi ligiĝis.

— Ne vane! — obstine kontraŭis Demĉjo. — Vi ĉiam kun

mi pare en la maron iradis, tial viva revenadis. Sed se irus sen mi — estus malbone...

La rudristo ekridis, frapis Demĉjon al la ŝultro.

— Bravulo! Laŭ vi rezultas, ke se vi estas kun mi — malfeliĉon ni ne atendu...

Ili silentis iom.

— Tamen la ŝipo estas granda! — diris Demĉjo. — Kaj la ceteraj same estas grandaj. Mi ĉiujn distingis...

Rjabov ne respondis.

— Oĉjo! — nelaŭte vokis Demĉjo.

— Nu, kio?

— Mi pri tio, oĉjo, — por kio do ni en la maron ekiris?

— Mi ekiris, kaj vi post mi kiel vosto ligiĝis! — respondis Rjabov edife. — Elspuris kaj ligiĝis. Kiu vin vokis? Nu, diru, ĉu mi vokis vin? Nun do vin mem riproĉu!

— Oĉjo, kaj por kio ni la velojn malhisis? Eble, ni povus fuĝi de la svedo?

— Sed ili ja per kanono pafis?

— Jen! Pafis, sed ne trafis.

— Ili ankoraŭ foje pafus kaj trafus.

— Ne tiel simple...

— Simple, ne simple! — kun ĉagreno diris Rjabov. — Ĉiam vi rezonadas. Ni kaptiĝis — do sidu nun kaj silentu...

Sub la piedoj ree ekmoviĝis ratoj. Demĉjo tremeris, grimpis pli alten sur ŝnuregojn, el tie demandis:

— Oĉjo, kaj la libron oni al mi nun ne redonos?

Rjabov subridis:

— Pri kio vi rememoris! Pri la libro! Mi ne scias, kiel ni vivaj el ĉi tie revenu...

— Mi sen tiu libro eĉ ne povas reveni en Arĥangelskon! — suspiris Metrio. — Ievlev Silvestro Petroviĉ ĝin donis; gardu ĝin, diris, kiel la vivon kaj studu tage kaj nokte, tiam mi sendos vin en la naviglernejon, en Moskvon...

— Malproksima estas por ni nun, knabo, Moskvo! — malgaje diris la rudristo. — Pli malproksima, ol Grumanto.

— Ĉu ili pendumos nin? — rapide demandis Demĉjo.

— Nu, ne pendumos...

— La avon ja ili pendumis. Mi rekonis, tio estas Simono Gregorieviĉ.

Rjabov silentis.

— Ne, ili certe pendumos! — konvinkite prononcis Demĉjo. — Ili nin ŝlosis, ĉenojn surmetis, kial ne pendumi? Nun baldaŭ pendumos...

— Kaj se oni pendumos, por vi la vojo estas rekta — en la paradizon. Vi estas preĝulo! — diris Rjabov. — Tie tiajn oni ŝatas. Diru tie ankaŭ pri mi vorton: diru, strangolis oni nin kune, la viro estis peka, sed mi lin forpreĝos... Vi, frato, ne havas kion timi. Por mi estas pli malbone. Min — en la inferon: ardajn patojn leki...

Demĉjo supre maltrankviliĝis:

— Pu, pu, por kio tielajn vortojn diri?

— Jen, mi la veron diras...

Ili ree eksilentis por longe. La matrosoj trans la septo insultadis, ludadis ĵetkubojn. Estis aŭdeble, kiel kun susuro alkuradis ondoj, kiel batis tamburoj, kiel ekkantis unu klariono, poste — multaj. Sur la tuta eskadro respondis signalaj tamburoj.

— Oĉjo, kio estas nun — ĉu mateno aŭ vespero? — demandis Demĉjo dormeme.

— Sed ĉu por ni ne estas tutegale? — respondis Rjabov.

Poste trans la septo oni eksilentis — eble, kuŝiĝis dormi. Bruante per la ĉeno, Rjabov leviĝis, kliniĝis al Demĉjo, diris al li serioze, kun graveco:

— Jen kio, Metrio: kion ajn vi vidos kaj aŭdos — silentu. Silentu, kaj kiel mi faros, tiel ankaŭ vi faru. Bone mi faros aŭ malbone — vi nur silentu.

Demĉjo malfermis la okulojn, en la mallumo brileris la pupiloj.

— Jen, kiel vi okulumas, — kun ĉagreno diris la rudristo. — Kiel estas ordonite al vi — tiel faru...

— Bone! — flustre respondis Demĉjo.

Ree bruis la ĉenoj — Rjabov kuŝiĝis sur ŝnuregojn. Kaj tuj trans la septo, al kiu li alpremiĝis per la dorso, arde kaj rapide ekflustris ies voĉo:

— Viroj, he, viroj! Respondu!

Rjabov turniĝis, alpremiĝis per la orelo al la humida putra tabulo. Tie, trans la septo, iu estis peze moviĝanta, snufanta.

— Ĉu ruso? — per streĉita laŭta voĉo diris Rjabov.

— Jes, ruso, ruso, fiŝisto el Arĥangelsko. Kaj vi kiu estas? Laŭ la voĉo ŝajne konata. Diru, mi petas, vi ŝajne similas al unu rudristo... Ĉu Rjabov?

— Nu, Rjabov...

— Kiu estas tie, oĉjo? — kun maltrankvilo demandis Demĉjo.

La rudristo forsvingis.

— Rjabov mi estas, Ivano Sabateiĉ. Kaj vi kiu estas?

— Ja Longinov, ĉu vi ne rekonas? Kiom da jaroj ni kune iradis...

— Nilo?

— Ĝuste! Kun Kopilov ni ekiris, la diablo nin puŝis, la edzino ĉiam instigadis — por Aleĉjo kaj Liza ne estas manĝo, akiru almenaŭ iom da fiŝo. Jen ni akiris...

— Ĉu oni vin katenis?

— Firme! Sed vi aŭskultu, Ivano Sabateiĉ. Eble, ni tamen foriros...

Longinov ekflustris ankoraŭ pli mallaŭte. Rjabov pli divenadis, ol aŭdadis. Kvazaŭ estas sur la ŝipo iu propra, promesis segileton — trasegi truon en la kameron, kie ŝipa provianto estas metita. El tie foriri estas afero ne malsimpla. Li promesis ankoraŭ veston doni svedan...

— Sed kiu li estas? — demandis Rjabov.

— Ulo ĉi-tiea, en nia lingvo parolas, kiu — mi ne scias, la vizaĝon ne vidis. Apude estas ŝipa provianto, li tie ĉiam

portadis kaj metadis ion. Tra septo, kiel kun vi, ni parolis. Hodiaŭ li devas ankoraŭ veni, mi diros pri vi, li helpos...

Rjabov silentis.

— Ĉu vi ne aŭdas? — mire demandis Longinov.

— Mi aŭdas.

— Kial do vi silentas?

— Ja kion diri...

Longinov ekmoviĝis trans la septo, poste insultis, poste tute mallaŭte demandis:

— Ĉu reale Rjabov?

— Oĉjo! — maltrankvile vokis Demĉjo.

Trans la pordo aŭdiĝis krudaj voĉoj de matrosoj, grincado de armiloj, insultoj.

— Oĉjo!

— Ne surda mi estas! — respondis Rjabov. — Aŭdas...

— Pendumos oni nin, oĉjo...

— Do ploru...

En la seruro kun knaro turniĝis ŝlosilo, Kristofero kaj Bill Hartwood kun oleaj lanternoj en la manoj haltis ĉe la sojlo. Post ili kun muskedoj en la manoj staris kelkaj soldatoj kaj ekzekutisto Svante Bagge.

— Eliru! — ordonis Bill Hartwood.

— La seruron necesas malfermi! — diris la ekzekutisto. — La ĉeno estas ŝlosita. Gardu vin, Kristofero, vi kliniĝos, kaj li batos vin al la nuko...

La soldatoj ŝovis la tubojn de la muskedoj en la pordon, al la vizaĝoj mem de Demĉjo kaj Rjabov, Kristofero malŝlosis la seruron, volvis la ĉenon sur la manon. Sur Demĉjon oni surĵetis lazon. Laŭ ŝtuparo ili leviĝis sur la pobkastelon. Kristofero per la kruro batis Rjabov-on al la flanko — montris, ke necesas iri sur la pobferdekon. Tie aŭdiĝis muziko, virina voĉo estis kantanta kanton. La adjutanto de la subadmiralo pririgardis la rusajn fiŝistojn, balancis la kapon:

— Kie estas iliaj kaftanoj? Ŝteluloj! Jam sukcesis priŝteli! Kiel ili en tia aspekto aperos al *herre* subadmiralo? Tamen, tio estas ne mia afero!

Rjabov, bruante per la ĉeno, sen kaftano, en ŝirita ĉemizo, senhaste eniris en la admiralan kajuton, kie brulis kandeloj, brilis arĝento kaj kristalvitro, kie kantis rufhara virino en nigra, brodita per perloj robo, kie viroj en perukoj ludis liutojn kaj klavicenon, fumante per mallongaj pipoj...

Sinjorino Gyllenstierna finis la kanton, ordonis al Okke:

— La rusoj eksidu kaj estu niaj gastoj. Transdiru — ilin atendas nenio malbona, honoro de grafo subadmiralo estas garantio! Ili ne havas kion timi...

Okke tradukis, Rjabov respondis pigre:

— Dum ni atendis vian inviton, de mi kaj jen de la junulo oni kaftanojn ŝtele deŝiris, ĉenojn anstataŭ la kaftanoj surmetis, — jen kiel bone estas gasti ĉe vi...

Okke, afable fleksiĝinte antaŭ sinjorino Gyllenstierna, komencis traduki, Rjabov lin interrompis:

— Li povas mensogi ion, ne bezonas ni vian interpretiston. La mia pli bone diros...

Demĉjo klare, mallonge, sentime tradukis ĉion, kion diris la rudristo. En la kajuto estiĝis silento, la oficiroj interrigardis, la subadmiralo estis malkonfide oblikve pririgardanta la impertinentan rusan piloton. Sen raporto eniris ŝipestro Urquhart, kunfrapis la manojn:

— Granda Ivano! Jen feliĉa renkontiĝo! Nun ja ni estos amikoj, mi esperas! Ho, se vi tiam forirus kun mi en la maron, kiel ŝanĝiĝus via sorto...

Kaj, ne sidiĝante, li komencis rapide rakonti al la subadmiralo — kia bonega maristo estas Granda Ivano. Li trairis la tutan Malvarman maron, plurfoje estis sur la Nova Tero, iradis al Grumanto. Antaŭ multaj jaroj la ŝipestro pagis grandan monon al monaĥejo, kiu posedis tiam la piloton, por havi Grandan Ivanon en sia ŝipanaro, sed tio ne sukcesis...

— Kion li mensogas? — demandis Rjabov Demĉjon.

— Li laŭdas vin, oĉjo, — flustre respondis Demĉjo.

Leŭtenanto Johan Morat konfirmis la vortojn de Urquhart:

— Ankaŭ mi inklinas supozi, ke tiu homo estas sperta maristo, pli bonan ol kiu ne eblas trovi. Sur lia ŝipo ni trovis kompason, gradbastonan mezurilon, libron pri navigarto. Kaj li jam estas ne tiom juna, ĉiuokaze li estas matura viro. Probable, li nemalbone konas la maron...

Urquhart aliris al Rjabov, frapis lin al la ŝultro, ekparolis bonanime:

— Tiu Ivano estas vera maristo! Mi ne forgesos, kiel en la malproksimaj jaroj, kiam mi ankoraŭ estis ŝipestro sur «Ora nubo», li enkondukis mian ŝipon en Dvinon. La ŝipo, kiun mi komandas, ne havu dek futojn da akvo sub la kilo, se mi kaj

Granda Ivano ne faris miraklojn sur la Dvina ŝanelo. Ĉu vi ne rekonas min, Ivano? Kvankam multaj jaroj pasis post tiam...

Rjabov trankvile pririgardis la dikiĝintan ŝipestron, respondis dece:

— Saluton, ŝipestro! Longe ni ne intervidiĝis, jen kia matura vi iĝis. Kial en Arĥangelskon ne plu venas?

— Jen, nun mi iras! — ekridis Urquhart. — Iras kun riĉa ŝiptrajno. Nu, Ivano? Kiel oni diras tion en la rusa? Kiu rememoras la pasintecon — tiu restas blinda? Vi havis ofendiĝon kontraŭ mi, sed mi deziris por vi bonon. Se vi tiam forirus kun ni — mi vetas la animon — nun al vi oni konfidus tutan ŝipon. Vi portus bonegan veston kaj tintigadis ormonerojn en la poŝo...

— Li eksidu al la tablo! — ordonis la subadmiralo en la sveda. — Se li vere estas tiom elstara maristo, kiel vi diras, — li sidu kun ni.

— Eksidu, Granda Ivano! — diris Urquhart. — Eksidu, malnova kamarado! Ni volas konversacii kun vi kiel kun nia amiko. Ni deziras al vi bonon, kaj nur bonon! Eksidu!

— Do, ĉu mi en la ĉenoj sidu? — demandis la rudristo. — Ne, ŝipestro, tiel ne taŭgas! Aŭ mi estas via kaptito, tiam mi sidu ne ĉe tablo, sed en la ĉenkesto; aŭ mi estas via gasto — tiam renkontu per riverenco!

Urquhart ekridis, karese balancis la kapon:

— Aĥ, Granda Ivano, mi rekonas vian karakteron! Kiom multaj jaroj pasis, sed vi tute ne ŝanĝiĝis. Kia vi estis — tia vi estas. Sed mi tre, tre ĝojas, ke ni renkontiĝis. Nia renkontiĝo en la maro estas donaco de la sorto kaj por vi kaj por ni...

Ŝipa forĝisto rapide demetis la ĉenojn. Rjabov forpuŝis ilin per la piedo, glatumis la kolon, la manojn; varmigante la muskolojn, turnis la kapon, poste diris al la ŝipestro:

— Ankoraŭ ordonu, sinjoro, ke oni la kaftanon redonu. Ne estas bone sidi inter vi ĉifonvestita kaj malriĉa. Kial malhonoriĝi...

La subadmiralo strabis al leŭtenanto Morat, tiu rapide ekparolis, ke nun la vesto ne troveblas, probable ĝi restis sur la dronigita velboato. Gyllenstierna ordonis alporti aliajn kaftanojn, la adjutanto ekkuris plenumi la ordonon, grumblante sub la nazon:

— Tutegale ni ilin pendumos, por kio ankoraŭ kaftanoj...

Rjabov eksidis en fotelon apud la septo, liaj verdaj okuloj estis flagrantaj per malbonkora fajro, ruza rideto apenaŭ glitis sur la lipoj:

— Eksidu, Metrio, pli bonas sidi ol stari. Vidu, kia riĉa kajuto. Nemalbone ili vivas, bonstate. Kaj tapiŝoj, kaj sur muroj ora ledo, kaj mem ili estas sataj, ĉu?

La adjutanto alportis la veston, Rjabov disetendis sur la manoj la malvastan svedan kaftaneton, subridis:

— Ne, amikoj, tiel la afero ne iros! Ĉu vi min opinias stultulo? Mia kaftano estis bona, de maldika drapo, kun ostaj butonoj, ĉirkaŭkudrita per ŝnuro, ankaŭ zono estis. Kaj vi alportis ian veŝton... Kaj ankaŭ knabo mia havis kaftanon bonan, ankaŭ kamizolon varman...

Demĉjo per malvarma voĉo tradukis ekzakte, la oficiroj ekridetis, kolonelo James en la rusa demandis, kion la rudristo deziras anstataŭ sia kaftano. Kaŝante koleran rideton, la

rudristo respondis, ke li ne komercas per vestaĵoj, ke anstataŭ kaftano li bezonas kaftanon, kaj ne inan sarafanon, sed ion kiel sur kolonelo James mem — tia ankaŭ al li konvenus...

Okke tradukis, sinjorino Gyllenstierna sonore ekridis:

— Kaj li estas amuza, tiu muĵiko! Amuza kaj kuraĝa! *Herre* James, fordonu al li vian kaftanon. Ja vi ne domaĝas, ĉu? Ni vidu, kiel aspektos rusa muĵiko en kaftano el arĝenta brokaĵo. Tio vere estas interesa...

— Mi tute ne vidas en tio ion ajn interesan, — malvigle diris ofendita James, — sed la ordono de la sinjorino por mi estas leĝo!

Kaj, kunpreminte la lipojn, li eliris.

Demĉjo surmetis sur sin la svedan kaftaneton, glatigis per la polmoj la harojn, eksidis gravmiene. Urquhart estis duonvoĉe rakontanta pri la pomoroj, pri tio, kiel ili estas fieraj kaj kiel ŝatas respekton. La subadmiralo aŭskultis, trinketante malfortan vinon, atende tamburante per la fingroj sur la tablo. La kajuta vaĉanto alportis la kaftanon de James, Rjabov enmetis la brakojn en la manikojn — la kaftano tuj krakis. Sinjorino Gyllenstierna diris kun rido:

— Urso, vera rusa urso...

Urquhart penis butonumi sur Rjabov la kaftanon, la kaftano ne kuniĝis, la rudristo grumble diris:

— Ankoraŭ zono sur li estis, mi vidis! Kial do sen zono, la mia ja estis kun zono kaj per ŝnuro ĉirkaŭkudrita... Vidu, ne kuniĝas, sed kun zono ĝi kuniĝus...

Li mem, ne atendante inviton, eksidis en tiun fotelon, kie

antaŭe sidis James, pririgardis atente la tablon, plendis al Demĉjo:

— Ĉiam estas tiel ĉe la fremduloj. Pladojn ili metas multajn, diversajn tranĉilojn, kulerojn, glasojn, sed da bonaj manĝaĵoj estas preskaŭ neniom. Vidu — fiŝeto malgranda, vidu — biskoto, iomete da viando — kaj estu sana! Ne, ili al ni, karaj amikoj, velboaton dronigis, ili min nuda faris, do ili nutros min laŭ la rusa kutimo, sed ne laŭ ilia. Diru al ili, Metrio, en Rusio oni manĝas plenforte, dum tiele estas nur sola moko. Ili portu brasiksupon, fiŝajn kapojn, viandaĵon ian, alion...

Demĉjo kun miro, timide, ĵetis rigardon al la rudristo, tiu estis apenaŭ rimarkeble ridetanta, en liaj okuloj brilis rapidaj malbonkoraj fajroj, inter la brovoj kuŝiĝis falto. Demĉjo konis tiun vizaĝesprimon de la rudristo: tia li iĝadis en la maro, dum kruela ŝtormo...

Frapis la pordo, revenis James.

Rjabov levis glason kun vino, diris al la kolonelo:

— Do, sinjoro, ankaŭ via alia kaftano estas ne malpli bona, ol la brokaĵa. Vidu, same kun arĝento, kia kudraĵo. Riĉe vi ĉi tie vivas, senrifuze. Komercas, mi pensas, kun profito, sen perdoj...

James eksidis apud sinjorino Gyllenstierna, kliniĝis al ŝia rozkolora aroma orelo, diris flustre:

— Li estas simple stultulo, tiu rusa Ivano. Ĝis nun li ne komprenis, ke ni tute ne estas negocistoj...

— Li estas simplanima kaj fidema! — respondis sinjorino Gyllenstierna. — Infano de maro... Ne gravas, kun tempo li ĉion komprenos kaj bonege servos al ni!

Ĉio iris bone. La rusa rudristo ŝajnis al ili enkorpiĝo de simplanimeco, ili ridis interne kaj plenumadis ĉiujn liajn dezirojn. La ruso estis tia, kia ili deziris vidi lin, kaj ĉio iris glate en tiu ludo, ĝis kiam la rudristo eksentis sur si ies atentan kaj malbondeziran rigardon. Li ĉirkaŭrigardis — ĉio estis kiel antaŭe, nur James ruĝiĝis pro la trinkita vino, kaj Johan Morat estis pri io interflustranta kun sia amiko Brems...

— Nu! — diris grafo Gyllenstierna. — Ĉu ne venis tempo paroli pri la afero?

Ili sidis unu kontraŭ la alia — la subadmiralo, retrokliniĝinta en la fotelo, kaj Rjabov. Ŝipestro Urquhart komprenis, leviĝis, palpebrumis al aliaj oficiroj. Sinjorino Gyllenstierna estis fingrumanta la klavojn de la klaviceno. Artileriisto Plomgren prenis liuton, Morat ekkantis malnovan kanton pri malbona sorĉistino. Grafo Gyllenstierna estis malrapide parolanta:

— Vi kondukos nian eskadron laŭ la Dvina ŝanelo al urbo Arĥangelsko. Se nin atendas batalo — ni akceptos ĝin kaj frakasos la malamikon. Vi estas sperta maristo. Niaj ŝipoj estas militaj ŝipoj, plej probable vi tion rimarkis. Tre multo el tio, kio nin atendas, dependas de sperteco kaj lerteco de la rudristo, tial ni ne avaros pri mona rekompenco. Eĉ pli, *herre* piloto. Kiam ni plenumos nian devon, viaj meritoj estos taksitaj de la reĝo de Svedio. Dum tuta mia vivo mi servis al la krono en la floto. Por mi sufiĉas rigardi al homo, kaj mi vidas, ĉu li estas maristo aŭ ne. Vi estas maristo! Vin atendas granda estonteco. Vi iĝos luterano, kaj, sendube, lia moŝto reĝo de Svedio nomumos vin ŝipestro de unu el siaj gloraj ŝipoj...

Rjabov turniĝis al Demĉjo: tiu sidis pala, liaj lipoj sensone moviĝis. La rudristo ordonis per trankvila voĉo:

— Traduku kion li diras.

Demĉjo ekparolis. Rjabov aŭskultis kun mallevitaj okuloj, fojfoje balancadis la kapon. Ĉe la klaviceno oni plu kantis kanton kun stranga refreno:

Karabi,
Titi Karabi,
Toto Karabo,
He, oĉjo Guillery,
Ne dronu en ebri'...

— Ĉu vi ĉion diris? — demandis Rjabov.

— Ĉion, oĉjo.

— Nun respondu!

La rudristo komencis paroli, kaj subite komprenis, kies atenta rigardo maltrankviligis lin: servisto en mallonga ruĝa kaftano estis foriganta de la tablo manĝilaron kaj de tempo al tempo kvazaŭ celis Rjabov-on per siaj obstinaj grizaj malmildaj okuloj. Rimarkinte, ke la rudristo eksilentis, la subadmiralo ordonis al Jakobo iri for. Tiu, alte tenante la pleton, ekiris al la pordo. La rudristo ekparolis denove. Li ne rigardis al Demĉjo, sed vidis, kiel la junulo kunpremas la manojn, aŭdis, kiel li subite sufokiĝis kaj kiel ree komencis spiri rapide kaj mallonge.

— Nu? — kun minaco en la voĉo demandis Rjabov.

— Ne tradukos mi tielaĵon! — laŭte diris Demĉjo. — Ne tradukos. Ja kio estas tio, oĉjo?!

— Se ne tradukos, do ne necesas! — kun la sama minaco prononcis Rjabov kaj manvokis al si Okke-n, kiu staris ĉe la

pordofosto.

Okke aliris kun preteco. Demĉjo alkroĉiĝis al la mano de Rjabov, tiu forskuis liajn varmegajn fingrojn, ekparolis malrapide, rigardante al la subadmiralo:

— La eskadron mi konduki povas, sed tio estas afero serioza, necesas atendi grandan batalon, kaj kiu la urbon Arĥanĝelan viva atingos, tiu eterne al Dio preĝu. Kanonoj estas multaj, kaj tiuj kanonoj faros tondron. Pri tio mi avertas. Ankoraŭ en la skansoj estos dogana pririgardo — tie komenciĝos batalo. Do, eble, eĉ la tuta afero por vi ne estas profita?

La subadmiralo aŭskultis atente, rigardis sendeŝire en la okulojn de Rjabov, suĉis la estingiĝintan pipon. Ĉe la klaviceno oni gaje kantis:

Titi Karabi,
Toto Karabo,
He, oĉjo Guillery...

— La afero estas granda, — parolis Rjabov, — kiel oni ĉe ni en Rusujo diras: aŭ en piedingon per la piedo, aŭ al arbostumpo per la kapo. Se oni kaptos viva — same la haŭton deŝiros. Kaj ne eblos poste vivi en sia lando, sinjoro, neniel eblos. Ajna knabo en la vizaĝon kraĉos, kaj kiel ne kraĉi — perfidinto, judaso, — tie indulgon atendi ne eblas... Do, rezoni necesas: se tiun aferon fari, la judasan, do fari tiel, ke ĝis la morto mem vivi kaj ne koni malriĉon...

La subadmiralo kapjesis, konsentante. En la kajuton ree eniris la servisto en ruĝa kaftano, alportis kruĉon kun maltbiero. Gyllenstierna ne rimarkis lin, la servisto atente,

diligente estis dismetanta la kruĉetojn...

— Kio poste estos — kiu scias! — daŭrigis Rjabov. — Ĉu laŭdos la reĝo aŭ ne laŭdos, kun mono ĉiam eblas vivi, kaj sen ili — ne. Ne saĝa estas homo, sed forta estas lia monujo. Do mi tiel juĝas. Mia prezo estas granda, mi ne kaŝas, sinjoro, sed ankaŭ intenco via estas nemalgranda...

— Kiom do li deziras da mono? — tra la dentoj demandis la subadmiralo Okke-n.

— Multe! — respondis Rjabov, kaj liaj okuloj ree ekbrilis. — Pli multe, ol Judaso...

— Oĉjo! — ekkriis Demĉjo. — Oĉjo! Dion timu...

Rjabov turniĝis al Demĉjo, diris kun kruela subrido:

— Sed kial mi en ĉi afero Dion timu, Metrio? Ne flamiĝu, knabo, alie oni vin tuj katenos. Sidu...

Okke flustre tradukis al la subadmiralo, pri kio estis parolantaj Rjabov kun Demĉjo, grafo Gyllenstierna kapmontris al Demĉjo, demandis:

— Ĉu li dezirus, ke oni lin pendumu? Ĉe ni tio estas farata rapide... Kaj se via prezo estos tro alta, mi vokos la ekzekutiston, kiu scipovas marĉandi...

La rudristo ruze mallarĝigis la okulon:

— Scipovas? Ĉu vere, sinjoro? Se li scipovus, tiam ne starus ĉi tie via eskadro...

Li leviĝis, dankis pro gastamo, diris firme:

— Do, ni ne interkonsentis. Kia povas esti marĉando, se oni minacas per ekzekutisto...

Rapide aliris ŝipestro Urquhart, maltrankvile demandis, kio okazis; Rjabov respondis, ke li ne ŝatas, kiam oni al li minacas per ekzekutisto.

— Unue ĝentile, kiel necesas, sed nun tuj pendumi? Ne tro multe da utilo estas de via pendumilo... La velboaton vi dronigis, la ŝnuraro estas sur la fundo, kaj nun — ekzekutiston... Ne, amikoj, ne tia homo estas Ivano Sabateiĉ Rjabov, kiun trompi kaj prifriponi eblas, kiam li sian profiton vidas...

— Kiom do, diablo prenu?! — kriis Gyllenstierna.

Rjabov flustris, kvazaŭ kalkulis mense, movis la fingrojn, diris firme:

— Da taleroj oraj kvin centojn. Tricent hodiaŭ — kaj sur la tablon meti, ducent — kiam la afero estos farita. Atendu, tio estas ne ĉio. Nutrado en la maro ne de la matrosa tablo iru, sed de ĉi tie, kaj kiam mi diros — tiam alportu...

Okke estis tradukanta, en la admirala kajuto ĉiuj eksilentis, aŭskultis mirege. Ŝipestro Urquhart ridetis, kolonelo James rigardis tra la malfermita pordo de la galerio al kurantaj post la pobo ondoj...

— Kaj ne tenu min en la ĉenkesto! — estis diranta Rjabov. — Kajuton por mi, kiel por ĉiuj ceteraj maristoj, kaj oni kun tuta respekto al mi parolu. Kaj per pendumilo min ne timigu — mi spertis timojn!..

Li pensis iom kaj aldonis en silento:

— Kiam mi ion ankoraŭ rememoros — mi diros...

Okke finis traduki, la subadmiralo Gyllenstierna kunpremis

la pugnojn, kiel li faradis tion antaŭ ol bati kulpan matroson al la dentoj, rigardis al siaj fingroringoj, respondis:

— Arogantulo!

— Kio? Kio? — kun scivolemo demandis Rjabov.

Okke ne respondis — rigardis al la subadmiralo. Sinjorino Gyllenstierna diris edife:

— Mia amiko, ne hastu kun rifuzo. Pripensu.

— Ĉesu iradi antaŭ la okuloj! — kun incitiĝo kriis Gyllenstierna al Jakobo. — Kiu bezonas nun tiun stultan bieron?

Kaj, vokinte per sonorileto la adjutanton, ordonis tuj sendi la trezoriston de la eskadro kun mono. Okke riverencis al Rjabov, rakontis, ke liaj kondiĉoj estas akceptitaj.

— Jen, akceptis! — morne respondis la rudristo. — Kial necesis brui al mi, per pugno minaci...

La monon li kalkulis longe, poste postulis al si monujon, streĉis sur ĝi rimenetojn, sed ŝanĝis sian decidon, kaj ankoraŭ foje komencis kalkuli la orajn monerojn. Stupora Demĉjo el sia angulo rigardis al li per larĝe malfermitaj timigitaj okuloj: antaŭ li estis alia homo — terura, avida, tute ne simila al tiu Rjabov, kiun li konis kaj amis tutkore...

Ferminte la monujon, la rudristo diris al ŝipestro Urquhart:

— Ankoraŭ nemulte mi prenis de vi. Kalkulu mem — por velboaton aĉeti kiom necesos? Retojn bonajn, ŝnuraron ian. Al la monaĥejo ŝuldon redoni. Al la edzino regalon, al mi mem por festeno... Kaj vestiĝi necesas, ja ne indas tiel: ĉapo el haroj, gantoj el haŭto, bastoŝuoj anstataŭ botoj. Kaj ankoraŭ vivi

necesas — do jen rezultos ĝuste!

Li frapis Urquhart-on al la grasa dorso, ekridis kaj diris:

— Kial do vi kantojn kanti ĉesis? Vi festenu, festeni estas bona afero, nun ni vivas, kaj kio morgaŭ estos — kiu scias? Rabisto estas viva mortinto...

Urquhart ne komprenis, miris:

— Sed ĉu povas esti viva mortinto?

— Tio estas proverbo! — respondis la rudristo. — Kaj en proverbo multo povas esti...

Demĉjo plu rigardis al la rudristo, — ne, tio estis li, Ivano Sabateiĉ, kaj la okuloj estis antaŭaj, tiaj, kiaj fariĝadis al li en la maro, en kolera malbonvetero, kiam aliaj fiŝistoj jam kantis al si mortopreĝon, sed li rigardis malproksimen, serĉis la horizonton, mallarĝiginte la okulojn, kaj koleraj fajretoj brulis en la verdaj pupiloj...

Ĉapitro kvara

Vorto iĝas faro, knabo iĝas viro, vento iĝas uragano, kiu dubus pri tio?

Chamisso

1. Knabo iĝas viro...

La adjutanto kaj la kajuta vaĉanto kun olea lanterno en la mano kondukis ilin tra la koridoro en la kajuton, kiun destinis por la rudristo la ŝipestro de «Krono». Malforta fajro prilumis ŝipatakajn hokojn, pendantajn sur la muroj, sitelojn por okazo de incendio, mallongajn lancojn, oportunajn por batalo en mallarĝaj ŝipaj pasejoj, volvitajn feltajn tapiŝojn, duonbarelojn kun sablo.

— Ĉi tie! — diris la adjutanto.

Rjabov la unua eniris en la malaltan sufokan kajuton. La kajuta vaĉanto mallevis la lanternon en la neston. La adjutanto ĝentile demandis, ĉu sinjoro piloto havos iajn dezirojn. La rudristo oscedis, ĉirkaŭrigardis, diris pigre:

— Vi almenaŭ felton sternu sur kofrojn, por kio do tiel sur nudaj tabuloj dormi? Kaj vinon al li ordonu, Metrio, ke li alportu, aŭ bieron, kaj ion por ronĝi pro enuo...

La adjutanto riverencis, lia vizaĝo estis esprimanta malestimon. La kajuta vaĉanto staris senmove.

— Pli rapide moviĝu! — ordonis la rudristo. — Per gajaj piedoj, vigle...

La svedoj foriris, la rudristo subridis. Demĉjo estis

rigardanta al li per rigidiĝinta rigardo.

— Kial vi rigardas? — demandis Rjabov. — Ĉu ne rekonis?

Demĉjo mallevis la okulojn, suspiris, liaj lipoj tremeris — li deziris ion diri, sed ne diris. La servisto en ruĝa kaftano alportis sur kupra pleto flavan bieron, maltajn flanojn kun salo kaj kumino, brunan vodkon kun maceritaj galangaj radikoj.

— Mi ne plu deziras drinki! — diris Rjabov al Demĉjo. — Li forportu...

La servisto elaŭskultis Demĉjon, foriris kun sia pleto. Demĉjo forturniĝis de la rudristo, kunpremis la vangojn per la polmoj, tuta ŝrumpis, kvazaŭ pro malvarmo.

— Metrio! — vokis Rjabov.

Demĉjo ne moviĝis.

— Vane vi kondutas stulte, knabo! — diris la rudristo. — Tio ne estas via zorgo...

Demĉjo silentis, ŝrumpis ankoraŭ pli forte, maldika, mizeraspekta, en malvasta sveda kaftaneto. La rudristo kuŝiĝis sur kofron, metinte la manojn sub la kapon. Ili silentis longe...

— Jen kio, Metrio! — ekparolis finfine Rjabov. — Vi min de la infaneco jen kiel kredis! Vi ankaŭ nun min kredu. Vi ne povu ne kredi min...

Demĉjo ekstaris, batiĝis per la maldika ŝultro je la pordofosto, lame ekkuris tra la koridoro. Rjabov eksentis malbonon; bruante per la botoj, li ekkuris post li, kriis:

— Metrio? Kion vi faras? Metrio...

La mallonga kaftaneto de Metrio glitis apud la lanterno,

pendinta ĉe la ŝtuparo, Rjabov ekkuris pli rapide, elsaltis post li al masto, kriis al sveda vaĉanta matroso:

— Tenu lin! Tenu!

La matroso komprenis — submetis la piedon, Demĉjo stumblis, falis sur peĉitajn tabulojn de la ferdeko. Rjabov levis lin, li komencis ŝiriĝi el la manoj, per malamanta voĉo diris:

— Tutegale mi dronigos min, ne vivos tiel...

— Sed vi aŭskultu! — ordonis Rjabov. — Vi min aŭskultu, stultulo...

La lipoj de Demĉjo tremis; senfortiĝinte, li malrapide ekiris laŭ la pobkastelo. Svedoj interparoladis, rigardante al li; unu vekis Urquhart-on, raportis, ke la rusoj, ŝajne, deziris fuĝi. La ŝipestro, surmetinte ĥalaton, eliris el la kajuto, severe demandis Rjabov-on, por kio li diboĉas. Rjabov sidis sur kabla volvaĵo, rigardis al la maro. Urquhart ripetis sian demandon.

— Iru vi, sinjoro kara, for de mi! — respondis Rjabov.

— Sed via interpretisto deziris fuĝi? Eble, necesas surmeti ĉenojn sur lin?

— Iru for, sinjoro! — kun angoro reagis Rjabov. — Iru, ni ne havas pri kio paroli...

Urquhart ŝultrolevis, ordonis al la vaĉantoj senĉese observi la rusojn. La svedoj, interflustrinte, trenis Demĉjon en la kajuton, poste aliris al Rjabov...

— Bone, — diris li, — mi iros. Kaj vere — dormi tempas.

Demĉjo plu sidis sur la kofro, tute kunpremiĝinte kiel bulo. Rjabov kuŝiĝis sur la felton, senvorte turniĝis al la septo, sed ekdormi li ne sukcesis. Sur la pobkastelo kaj la pobferdeko

ekalarmis tamburoj, supre tondris muskedaj pafoj, knaris pulioj — matrosoj estis mallevantaj savboaton de la rostroj. Dufoje bojis kanono.

La rudristo levetiĝis:

— Kio estas tie?

— La ruso, probable, fuĝis! — fiksaŭskultante, mallaŭte respondis Demĉjo.

Rjabov silentis.

— Tiu, kiu apud ni en mallibero sidis, — diris Metrio. — Foriris li nun. Kaj ni...

— Ĉu vi eksilentos? — kriis Rjabov. — Sufiĉas boji!

2. Sankta Brigita estas malkontenta

Nokte sur Sosnovco kaj en la malproksima setlejo trans la markolo pafadis per muskedoj soldatoj de Golgolsen, sed tute vane — la fiŝistoj kvazaŭ malaperis senspure. Matene Golgolsen mem, elspirante vodkan odoron, leviĝis laŭ la ŝtuparo de «Krono»; frapante per la ŝuoj, li ekiris en la admiralan kajuton — raporti al la subadmiralo. Grafo Gyllenstierna, sen peruko, kun elstarantaj kartilagaj oreloj, kun pendantaj brovoj, estis trinkanta en sia kajuto dekoktaĵon kontraŭ incitiĝo de galo. Liaj okulblankoj dum la nokto ricevis koloron de okro, la vizaĝo iĝis tute flava...

— Nu? — demandis la subadmiralo.

— Sankta Brigita estas malkontenta pri ni! — respondis la maljuna eskortulo. — Ni ne sukcesis kapti eĉ unu homon... Kaj tiu fuĝinto... Estas neniaj spuroj...

La grafo altrinkis la dekoktaĵon per vino, ordonis al la kajuta ŝipknabo doni la perukon.

— Estas malrekte, *herre* subadmiralo! — diris Golgolsen. — Tro klinita al la maldekstra orelo...

Ili ekfumis pipojn. Golgolsen movadis la lipharojn, pensadis, poste diris singarde:

— La matrosoj estas ne tro kontentaj, *herre* subadmiralo. Ili plendas pri tio, ke oni ilin multe punas en tia malfacila ekspedicio...

Golgolsen ne findiris. Bruego de terura forto skuis la ŝipon, trans la septo kriis sinjorino Gyllenstierna, matrosoj, soldatoj, oficiroj — en tiuj vestoj, kiujn ili surhavis ĉi-momente — ekkuris al la pobo de «Krono». La subadmiralo kaj Golgolsen elkuris sur la galerion de la admirala kajuto, la subadmiralo kaptis sian kapon: «Kolera urso» — la ŝipo, kiun komandis Golgolsen, — levinte la skulptitan pobon, estis rapide mergiĝanta en akvon.

Sur «Krono» jam estis batantaj alarmon kupraj sonoriloj, de la rostroj oni estis mallevantaj savboatojn. Urquhart estis krianta en paroltubon komandajn vortojn, kiujn neniu aŭdis. De la aliaj ŝipoj estis irantaj savboatoj por helpo de la pereantoj. Golgolsen, griza, kun pendiĝinta makzelo, balbutadis:

— La pulvokamero! Eksplodo en la pulvokamero! Dio indulgu min! Sur la insulo ili trovis vodkon kaj ebriiĝis. Mi ordonis al ili ne preni tiun vodkon, sed ili tamen ĝin prenis...

El la ŝipanaro de «Kolera urso» saviĝis nur sepdek tri homoj. Frostiĝintaj, timigitaj, malsekaj, ili vagadis en la ŝipoj, donintaj al ili azilon, diradis, ke nun de la ekspedicio ne indas

atendi bonon, ke la pereo de «Kolera urso» estas malbona antaŭsigno, ke la maran demonon per io kolerigis la maristoj de la floto de lia moŝto reĝo de Svedio. Tra la eskadro flugis onidiro, ke Birge Kornusa kruro en la pasinta nokto mem vidis la demonon, kiu al li rememorigis, ke dum ŝarĝado en Stokholmo «Kolera urso» kliniĝis al la dekstra flanko, kaj tio, kiel scias maristoj, aŭguras nenion bonan. Alia matroso — portugala dungito — la demonon ne vidis, sed konversaciis en sonĝo kun sankta Antonio, kiu esprimis malbone pri grafo Gyllenstierna kaj konsilis ne iri al Arĥangelsko. Tria — liphara dikulo el ŝipataka taĉmento — deklaris en la pruferdeko, ke la tuta afero estas en la ruso, kiu sukcesis fuĝi de la flagŝipo. La fuĝinto ja estas sorĉisto!

Kiel okazis la eksplodo — neniu sciis, kaj tial ĉiuj ŝultrolevadis kaj diradis, ke ĉi tie estis ne sen la rusaj fiŝistoj. Kvankam en la eskadro oni sciis, ke la rusoj neniel povis penetri en la pulvokameron, tamen onidiron pri tio, ke la ŝipo eksplodis kulpe de ebria kanonestro, multaj neadis, ĉar timo jam penetris la eskadron kaj glaciigadis la korojn de la maristoj de la floto de lia moŝto reĝo.

Je la dua horo posttagmeze grafo Gyllenstierna leviĝis sur la pobferdekon kaj ordonis al la tamburistoj bati ekiron. Super la maro sterniĝis malalta nebulo, sur la ĉielo estis grimpantaj ŝiritaj nuboj, estis tre sufoke.

— La vetero, *herre* subadmiralo, malboniĝas! — diris ŝipestro Urquhart. — Necesas atendi ŝtormon.

— Ĉu vi supozas, ke mi tion ne vidas? — demandis Gyllenstierna.

Sur la pobferdekon leviĝis ekzekutisto Svante Bagge,

demandis, kion li faru kun la pendumita maljunulo.

— En la akvon! — abrupte diris Gyllenstierna.

— Sed pendumito sur ŝipo alportas sukceson! — kontraŭdiris Bagge. — La malnovaj reguloj de marnavigado instruas nin pri tio, ke virino sur ŝipo antaŭsignas danĝeron en vojaĝo kaj nur korpo de pendumito povas favorigi la sorton...

Gyllenstierna turniĝis al la ekzekutisto per la flava vizaĝo; svinginte la manon, li batis lin per la pugno al la dentoj, poste diris dise:

— Kiam mi bezonos korpon de pendumito, mi ordonos pendumi vin! Vi mem bone scias, ke pendumi ekzekutiston signifas vere favorigi la sorton...

La ekzekutisto riverencis kun tordita vizaĝo, foriris ĵeti la korpon de la ekzekutita maljuna fiŝisto en akvojn de la Blanka maro.

Dum li estis trapuŝiĝanta al la masto, oni mokis lin:

— Jen iras prikraĉita ekzekutisto!

— Nu, eble, nun Bagge iĝos iom pli bonkora...

— Li ne iĝos pli bonkora eĉ en tombo...

— Mi aŭdis, knaboj, ke punita ekzekutisto ricevas duonan monon...

— Lasu la malfeliĉulon pasi...

La korpo de la ekzekutito mergiĝis en ondojn.

La ŝipoj unu post alia eliradis sur grandan akvon. Gyllenstierna morne rigardis, kiel oni hisas velojn, kiel la grandegajn tukojn plenigas vento, aŭskultis signalajn

tamburojn, kantadon de klarionoj. La kuracisto de la eskadro diris al la subadmiralo, ke pro troa galo dolĉa ŝajnos al li amara, bona — malbona. Ĉu pro la malsano aŭ pro io alia, sed grafo Gyllenstierna en tiu tago estis multe pli morna, ol kutime, kaj senĉese sendadis al la ŝipoj signalojn pri kruelaj punoj. Matrosoj, insultante kaj blasfemante, kuŝiĝadis sub knutojn de ekzekutistoj; sur jaĥtoj, fregatoj, batalŝipoj fajfadis lineoj kaj vergoj. Sur ŝipoj rampis onidiroj:

— En la eskadro estas rusoj: neniu alia povis helpi tiun fuĝinton. Li mem segis siajn ĉenojn...

— La virino en la eskadro alportas malfeliĉon...

— Kaj ŝi krome estas rufa.

— Ŝi ne estas sola: kun ŝi estas ŝia ĉambristino — nigra, kiel edzino de Satano.

— La rusa fuĝinto trasegis septon en la kesto.

— Por tio necesas segilo...

— Kaj la ĉielo? Kion eblas atendi de tia ĉielo?

Kaj la ĉielo kaj la maro estis antaŭdirantaj ŝtormon. Ial ŝtormo ĉi tie ŝajnis pli terura, ol tie, en propraj maroj. Tio estis fremda maro, kun fremdaj, malamikaj, streĉiĝintaj bordoj.

Kaj matrosoj en la eskadro interflustradis:

— Ĉu ne estus pli bone turni malantaŭen?

— Se la demono kaj sankta Brigita ne interkonsentus inter si...

— Ni jam perdis unu ŝipon...

Sed timigitoj estis ne tiom multaj. Ilia flustro, onidiroj, kiuj

de ili venadis, valoris nenion: Arĥangelsko estis jam nemalproksima, ĉiuj sciis, ke Gyllenstierna por tri tagoj donos la urbon al la dungitoj. Soldatoj kaj matrosoj revis pri amasoj da oro, karaj peltoj, brokaĵoj, preĝeja ilaro — ĉio, kion ili ricevos pro fidela servo al la krono. Kaj ju pli proksima estis la urbo, des pli laŭte, des pli furioze revadis la dungitoj.

— Post la ekspedicio mi revenos en Svedion kaj malfermos butikon. Por mi sufiĉas maro! — diradis unu.

— Mi havos bakejon! — asertadis alia. — Bakejon kun du bakistoj! Kaj mi mem sidados kaj nur kriados instige!

— Mi malfermos tavernon! — rakontadis tria. — Mi nomos ĝin «Gemuta bordo» — jen kiel! Kaj mi mem drinkos kiom deziros. Kio koncernas la demonon kaj sanktan Brigita-n, do mi fajfas pri ili! Nur estu mono, jen kion mi diros al vi, knaboj...

Iuj revis iĝi monŝanĝistoj; kelkaj fanfaronis, ke entute nenion faros; estis ankaŭ tiaj, kiuj silentis: tiuj jam akumulis iom kaj post la ekspedicio intencis uzuri...

Malgraŭ tio, ke la ŝtormon oni atendis, ĝi tamen aperis neatendite, faligis «Kronon» flanken kaj momente disĵetis la ŝipojn de la eskadro. Sur la flagŝipo oni apenaŭ sukcesis malhisi la suprajn velojn, kaj eĉ perdis matroson dum tio; sur «Justa kolero» la vento disŝiris je pecoj la antaŭtopvelon; sur «Aroma floro» falis la ĉefmasto, la ŝipo kuŝiĝis sur la flankon. La matrosoj per hakiloj hakis la vantojn, kaj la jaĥto rektiĝis. La vento, deŝirante de grandegaj ondoj ŝaŭmajn pintojn, fajfis kaj hurlis en ŝnuroj, la ŝipoj enakvigadis la buspritojn. Kun ĉiu minuto la ŝtormo iĝadis pli feroca.

Vespere, en duonmallumo, sub malaltaj nigraj nuboj, neatendite proksime malkovriĝis la Vintra bordo. Subadmiralo Gyllenstierna ekstamfis al la navigisto; tiu respondis, retenante koleron:

— Mi havas nek sunon, nek stelojn por fari astronomiajn kalkulojn kaj determini ekzaktan lokon...

Gyllenstierna vokis la vaĉantan oficiron, ordonis pafi per signala kanono, por ke la ŝipoj sciu, kie estas la flagŝipo, sed respondajn pafojn neniu aŭdis.

Urquhart sendis por la rusa piloto, tiu pigre leviĝis laŭ la ŝtuparo, indiferente pririgardis kurantajn ŝaŭmajn ondegojn, diris al la ŝipestro:

— He, kien vi iras. Vi eĉ krucosigni vin ne sukcesos — sur rokojn sidiĝos, saĝuloj. Jen ili — la Kedaj, mi ilin konas, — vidu, la akvo tie bolas...

Urquhart, paliĝinte, kriis: «Stiru dekstren!» Fortegaj rudristoj duope ekpremis la grandegan stirradon, «Krono» ruliĝis dekstren. Rjabov diris:

— Tre forte hodiaŭ ludas la vetero. Rigardu atente, ĉi tie droni estas simplege...

Sur la ŝtuparo la rudristo kunpuŝiĝis kun la servisto en ruĝa kaftano, tiu estis portanta sur la ŝipestran ponton al la subadmiralo varmegan flinon en kruĉo, ĉirkaŭvolvita per viŝtuko. La ŝipo kliniĝis, Jakobo surfalis sur Rjabov-on. Atenta rigardo de la servisto kruciĝis kun moka rigardo de la rudristo, li forpuŝis la serviston, konsilis trankvile:

— Iru sur viaj piedoj, kial vi falas...

Kaj ekiris en sian kajuton.

Jakobo ĵetis rigardon post la rudriston, surkuris laŭ la balanciĝanta ŝtuparo en la pobferdekon, kie en leda mantelo kun kapuĉo estis senmove staranta Gyllenstierna kaj aŭskultanta, ĉu respondos al la pafado de la flagŝipo iu ŝipo de la eskadro.

— Kiel fartas la sinjorino? — demandis Gyllenstierna.

— La sinjorino tagmanĝis kun bona apetito.

— Kiu kunmanĝas kun ŝi?

— Kolonelo James kaj ŝipestro Golgolsen, *herre* subadmiralo.

— Kion ili faras nun?

— Mi portis al ili kafon kaj benediktanan likvoron, *herre* subadmiralo.

— Ĉu ŝipestro Golgolsen estas sobra?

— Ne tro, *herre* subadmiralo.

Grafo Gyllenstierna rimarkis rideton, glitintan sur la vizaĝo de la servisto. Ne prokrastante eĉ por sekundo, li batis lin per la pugno al la buŝo — demalsupre supren, tiel, ke krevis la delikatleda ganto.

— Nun vi ne plu ridetos ĉe mi! — diris li.

Jakobo viŝis la sangon de la vizaĝo, rigardante al la okuloj de la subadmiralo. Tiu per malrapidaj glutoj estis trinkanta la flinon. Vento fajfis ankoraŭ pli stride, la korpo de «Krono» knaradis, tremadis, ĝemadis...

Kiam Jakobo malleviĝis laŭ la ŝtuparo, iĝis tute malhele pro

nigra grandega nubo, kovrinta la tutan ĉielon. En la bufedo tondradis vazaro, kupraj kaseroloj balanciĝadis kaj sonoradis, kvazaŭ sepultaj sonoriloj, stanaj kaj arĝentaj teleroj saltadis en siaj nestoj. La admirala bufedisto, elturmentita de marmalsano, estis dormanta sur kofro.

Jakobo eksidis sur malaltan benketon, malfermis keston kun bulboj, disfosis ilin, prenis de sur la fundo elastan, tre longan kaj akran hispanan faldeblan tranĉilon de toleda ŝtalo kun klingo, foriranta en la tenilon. Kaŝinte la tranĉilon ĉe la brusto, li fiksaŭskultis: sur la pobferdeko estis melankolie sonoranta sonorilo — signalo, ke oni ĉie estingu fajrojn, en tia ŝtormo eĉ unu fajrero povus fari nekorekteblan malfeliĉon.

— Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie! — diris la bufedisto, dolore oscedante. — Ĉu vi senŝeligos cepon?

— Jes, por la vespermanĝo! — respondis Jakobo.

— Ni surtabligos bovaĵon en cepa saŭco, — ree oscedante, diris la bufedisto. — Kio estas tie supre?

— Ŝtormo...

— Sankta Brigita koleras kontraŭ ni...

Ili silentis iom. La bufedisto tute vekiĝis kaj, kliniĝinte al Jakobo, ekparolis flustre:

— Aŭskultu, Jakobo, ĉu vi ne vidis nian segilon? Malaperis la segilo, — vidu, kia malagrabla historio. Mi traserĉis ĉie — ĝi mankas. Se la ekonomo ekscios, ni ne eliros el la manoj de la ekzekutisto, — ĉu vi divenas, kial? Tiu fuĝinto trasegis truon en la septo per ĝuste tia segilo, kia estis ĉe ni...

— Ĝi troviĝos! — diris Jakobo. — Ĝi simple enfalis ien

dum tia balanciĝado.

— Ĉu vi tiel pensas?

— Mi estas certa pri tio!

— Sed mi ne estas certa, — kun suspiro diris la bufedisto. — Mi pri nenio estas certa... Nekompreneblaj historioj okazas en la eskadro...

La bufedisto ŝatis paroli. Dum li estis rakontanta, Jakobo senŝeligadis kaj tranĉadis cepon por rostaĵo, poste, kiam la bufedisto ree ekfartis malbone, Jakobo eliris el la kuirejo. Laŭ malhela ŝtuparo palpe li trairis en tute malhelan koridoron kaj ekiris al tiu kajuto, kie loĝis la rusa perfidulo-piloto. Ĉe la leda, forte streĉita septo li fiksaŭskultis: egalmezura ronkado de trankvile dormanta homo estis aŭdiĝanta el la kajuto.

Nun necesis ekscii, kie estas la tradukisto de la rusa perfidulo, tiu, pri kiu oni diris, ke li volis ĉu dronigi sin, ĉu fuĝi de la sveda ŝipo. Demĉjon Jakobo ekvidis sur la orlopa ferdeko: la junulo sidis ĝibetiĝinte, ĉirkaŭpreninte la genuojn, liaj okuloj estis fermitaj.

En la koridoro Jakobo ree haltis, — lia koro batis malglate, la polmoj iĝis humidaj. Li ankoraŭ neniam mortigis homojn, kaj nun li subite pensis, ke, eble, li ne trovos en si fortojn per tranĉilo bati dormantan homon al la brusto. Sed li tuj imagis al si, kiel tiu homo, kiun li ne mortigos, ekstaros al la stirrado de la malamika ŝipo kaj kondukos la eskadron al Arĥangelsko, imagis al si, kiel ekbrulos poste la urbo, kiel ebriaj teruraj dungitoj iros tranĉi kaj bruligi, kia malfeliĉo trafos al centoj, miloj da homoj nur pro tio, ke li, Jakobo, homo, en kies vejnoj fluas rusa sango, ne kuraĝis mortigi la perfidulon, judason.

Li lekis la sekiĝintajn lipojn, viŝis la polmojn je la pantalono, premis risorton en la tenilo de la tranĉilo — la klingo kun obtuza susuro elsaltis eksteren, — provis per la fingro la pinton. Poste li ĉirkaŭrigardis kaj nehaste ree ekiris laŭ la longa malhela blinda koridoro preter la oficiraj kajutoj.

Ĉe la kajuto de la piloto li haltis. Tio estis ĉambreto — la naŭa de la ŝtuparo, en la maldekstra flanko. La piloto plu estis egalmezure ronketanta, kaj Jakobo pensis, ke estas mirinde, kiel homo kun konscienco de maliculo povas dormi tiel trankvile. Sed li pelis de si tiun penson kaj per mallaŭtaj paŝoj eniris en la kajuton, kie staris forta odoro de tanita ledo kaj tabako.

Ĉi tie estis tiel malhele, ke Jakobo nenion vidis kaj nur aŭdis ronketadon — glatan kaj monotonan. Atendinte, li faris moviĝon en la direkto de la dormanto, levis la tranĉilon kaj jam intencis bati, kiam subite la piloto vekiĝis kaj rapide demandis:

— Metrio?

Jakobo batis.

Tuj li aŭdis insultadon kaj eksentis, ke li falas. Neniam en sia vivo li konis homon de tiom frakasa forto, kia estis tiu rusa rudristo. La piloto ne batis Jakobon kaj ne sufokis lin je la gorĝo, li nur ĉifis lin, surfalis lin per la flanko kaj, snufante kaj grumblante kvazaŭ urso, insultante kaj ĝemetante, serĉis liajn manojn, por depreni la tranĉilon. Sed la tranĉilo jam antaŭ longe falis, ĝi kuŝis sub la skapolo de Jakobo. Finfine la piloto trovis ĝin, deĵetis flanken kaj tiam levis Jakobon sur la piedojn. Pensante, ke la piloto tuj mortigos lin, Jakobo, streĉinte ĉiujn fortojn, ŝiriĝis malantaŭen, kliniĝis, batis la rudriston per la kapo al la ventro kaj mem tuj senkonsciiĝis, ree faligita sur la

ferdekon per fortega movo de la mano de Rjabov.

3. Ni estas triope!

Probable, pasis sufiĉe multe da tempo, antaŭ ol Jakobo rekonsciiĝis. Malferminte la okulojn, li ekvidis, ke li kuŝas ne sur la ferdeko, sed sur la kofro, ke la kajuto estas hela — rozkolora flamo de lampo, metita en gliman kloŝon, prilumis la koncentritan vizaĝon de la rudristo, kiu kun scivolemo estis turnanta en la manoj la faldeblan tranĉilon, jen kaŝante ties klingon, jen premante la butonon...

«Tuj li eldonos min al la subadmiralo! — kun trankvila angoro pensis Jakobo. — Eldonos, kaj oni min pendumos. Pendumito alportas feliĉon al ŝipo, kial do ne pendumi tuj».

Li suspiris kaj ekĝemis pro doloro en la artikoj; la piloto ĵetis al li atentan rigardon kaj subridis. La subrido estis tiom senkolera kaj sincera, ke Jakobo ne kredis al siaj okuloj. La piloto subite diris mallaŭte kaj malgaje:

— Vi pensis, pensis — kaj elpensis. Ho, kapo! Per ruza tranĉilo, kiel kokidon... Ne, amiko, tiel oni ne faras...

Kaj li severe aldonis:

— Ankaŭ ni ne estas stultaj! Ja mi de la infaneco estis instruita dormi atente...

Malbutoninte sur la brusto la ĉifitan kaj trivitan kaftanon de James, li malligis rubandetojn de la ĉemizo kaj montris malhele ekbrilintan, tre maldikan kaj elastan kirason, ĝuste sur kiu glitis la pinto de la tranĉilo.

— Ĉu vi vidas?

— Vidas! — per solaj lipoj prononcis Jakobo.

— Jene. Ĉu estis vi, kiu Longinov-on liberigis?

— Mi...

— Por kio?

— Por tio, ke li estas bona ruso! — per sia karaktera voĉo prononcis Jakobo. — Por tio, ke li ne faru perfidon, sed faru nur bone, — jen por kio...

La rudristo ekrigardis al li per bonaj malgajaj okuloj.

— Iru for el ĉi tie, stultuleto! — diris li karese. — Iru! Ne indas al vi ĉi tie resti, oni atentos. Kaj por ni ne konvenas, ke oni nin ambaŭ kune vidu. Iru, kaj mi la lampon estingos, aŭdu, oni sonorigas — fajrojn ne bruligi...

Jakobo eksidis sur la kofro, lia kapo turniĝis, en la oreloj estis senĉese batantaj sonoraj marteloj.

— Ĉifis mi vin iomete! — diris la piloto. — Nenion, frato, eblas fari. Se oni demandos, diru — mispaŝis, de ŝtuparo falis, batiĝis. Tranĉilon vian prenu, forĵetu ĝin, — ĝi estas ruza, sed nefidinda. Kaj al mi, amiko, se vi povas, alportu hakilon, ĉu?

— Hakilon? — redemandis Jakobon.

— Jes ja, per kio oni brulŝtipojn hakas. Malgrandan, kaj la tenilo estu oportuna por mano. Ĉio povas okazi...

Dum kelkaj momentoj ili silente rigardis unu al la alia, poste Jakobo respondis:

— Jes, mi alportos hakilon.

— Alportu, amiko, alportu, hodiaŭ ankoraŭ ne necesas, kaj kiam al la buŝo ni estos alirantaj, tiam mi ĝin bezonos. Ne trompu nur...

— Mi alportos hakilon, — ripetis Jakobo.

Li ekstaris, ŝanceliĝis, kaptis la pordofoston kaj ankoraŭ iom staris tiel, fiksrigardante la rusan piloton.

— Do, mi esperu, ke vi alportos hakilon? — ankoraŭ foje diris Rjabov. — Mi ĝin eble treege bezonos.

— Mi alportos! — diris Jakobo, sed nun ili ambaŭ estis parolantaj ne pri la hakilo. Ili sen vortoj estis parolantaj pri tio, ke ili kredas unu la alian kaj komprenas unu la alian, ke ili helpos unu la alian kaj kune faros tiun aferon, kiu estas destinita al ili fari.

— Nu, iru!

— Mi iras...

Ŝanceliĝante, Jakobo eliris. Plu estis ululanta kaj ĝemanta la maro, plu pro batoj de ondoj skuiĝadis la korpo de la ŝipo. Rjabov estingis la lampon, kuŝiĝis sur la humidan felton, en mallumo silente ridetis al siaj pensoj: «Jen, vivo! Tiel vivi ankoraŭ unu semajnon, kaj vere la kapo povas ekdolori».

Poste venis Metrio, frostiĝinta en la ŝtorma vento, komencis en mallumo instaliĝi sur sia kofro. Estis aŭdeble, kiel li preĝas, flustras kaj tremas pro malvarma humideco.

— Metrio, he, Metrio! — mallaŭte voki Rjabov.

Demĉjo ĉesis preĝi, respondis per fremda voĉo:

— Ĉi tie mi estas.

— Ĵus min preskaŭ tranĉmurdis unu Dia sklavo...

Li atendis, ekparolis ree:

— Ĉu vi silentas? Ĉu vi pensas — prave, laŭmerite?

Stultuloj vi ambaŭ estas, kiel mi vin vidas. Bone, tiu ja min ne konas, sed vi?

Metrio flustris ion neaŭdeblan, kliniĝis pli proksime.

— Pensu per la kapo! Pensu! Ne stulta ja vi al la mondo naskiĝis, pensu do!

— Oĉjo... — kun ĝemo diris Demĉjo.

— Oĉjo mi estas kiom da jaroj! Intence mi al vi nenion diris tuj, malsaĝa vi estas, arda, juna, ne eltenos malhonoron aŭ konversacion ian, kiel hieraŭ kun la admiralo ĉe la tablo estis. Sed tiel ĉio bone pasis, kaj laŭ vi videblis, ke ne estas inter ni interkonsento, unu monon avidas, kaj la alia — alie. Kaj marĉandis mi ne por mono, sed por ke pli da kredo al ni estu. Ili per mono ĉion mezuras, laŭ mono juĝas, eble al mono preĝas. Vi mem vidis — ili kredis, ke troviĝis perfidulo, kredis, hundaj idoj, ĝojas, ke ili veturigas kun si rudriston, kaj ne havas penson, kiom kostos al ili tiu rudristo...

Li ekridis karese, eksentis, ke Demĉjo estas apud li, firme premis lian manon, ekparolis denove:

— Ĉu vi kredas nun? Ĉu vi komprenis, kial mi vin eĉ preni ne deziris? Ĉu vi komprenis, al kio ni iras? Ke tiuj ĉi ŝipoj...

— Mi komprenis! — kun admiro respondis Demĉjo. Kaj rapide, pasie ekparolis mem:

— Sed ĉu mi, oĉjo, ĉu mi... Kiel mi vivis — en mizero, kaj en la monaĥejo, kaj ĉe fremdaj homoj... Oĉjo, mi ne timos! Ĉu mi iam timis? Kio ajn estis, kiajn teruraĵojn ni travivis, sed ĉu mi timis? Mi, oĉjo, Ivano Sabateiĉ, se oni vin antaŭ la tempo mortigos, mi mem ĉi ŝipon surgrundigos, mi ja scias, kie, — plurfoje ni iradis. Mi surgrundigos!

— Malpli laŭte, — ridetante en mallumo, diris Rjabov.

— Mi — mallaŭte, oĉjo. Vi estu certa, oĉjo. Mi ne ektimos! Kial do tiele vivi, sub la svedo kia povas esti vivo! Ni lin venkos, en Moskvon mi veturos, en la navigistan lernejon. Tiam oni provu ne preni min pro mia lameco, nur provu! Tiam mi al la caro mem, al Petro Aleksejeviĉ. Diros ĉion, kiel estas...

— Kaj vi diros! — infektiĝante per la emocio de Demĉjo, konsentis Rjabov. — Kaj li, frato, juste juĝos. Li tiajn aferojn komprenas — kiu estas maristo, kaj kiu ne tre. Vi al li diru senkaŝe, ja vi maron vidis...

— Vidis! — ekkriis Demĉjo. — Vidis kaj ne tro ĝin timis. Kaj ke ni vivaj el ĉi afero eliros, pri tio, oĉjo, mi ne havas dubojn. Ni rebatos!

— Rebatos, — konfirmis la rudristo. — Se agi kun saĝo, tiam rebatos!

— Se ne flamiĝi. Ĉi tie necesas havi komprenon.

— Jen, kia saĝa...

— Ankoraŭ ne tiel al ni, oĉjo, okazadis. Nur la solan Grumanton rememori, do ĉio cetera estas ridinda...

Tiel ili interflustradis longe, konsolante unu la alian per promesoj, ke ili nepre venkos en la estonta terura batalo kaj ne nur venkos, sed eĉ restos vivaj kaj sanaj. Demĉjo, pro juneco kaj pro vervo de la imago, vere estis certa pri tio, sed Rjabov pensis alie, li firme sciis nur tion, ke li plenumos la aferon, kiun li devas plenumi. La cetero estis malklara kaj maltrankviliga.

Tamen al Demĉjo li pri tio ne diris eĉ vorton.

4. Arĥangelsko estas proksima!

Dum tuta tago kaj pli granda parto de kvieta blanka nokto la ŝipoj de la eskadro estis kuniĝantaj apud la Mudjuga insulo. Post ĉiuj venis fregato «Dia sonorado». La matrosoj kaj la ŝipestro de la fregato per propraj okuloj vidis la lastajn minutojn de jaĥto «Aroma floro», kiu dronis dum la ŝtormo, trafinte al rokoj, ne indikitaj sur holandaj mapoj. Neniu homo saviĝis el la pereinta ŝipo.

La rusaj bordoj estis silentaj kaj ŝajnis senhomaj. Sed kiam kelkaj matrosoj forpetis sin ĉasi, por diversigi la menuon de la admiralo per freŝa ĉasaĵo, la bordoj subite evidentiĝis loĝataj. Tuj kiam la matrosoj surbordiĝis, el apudbordaj arbustoj ektondris pafoj. La rusoj pafadis kun tia trafeco, ke neniu kuraĝis iri sur la bordon, por preni la korpojn de la pereintoj, tial ili restis kuŝi, kaj fluso forportis ilin en la maron.

Gyllenstierna ordonis bati al la bordo per kanonoj, kaj la ŝipaj baterioj sensence malŝparadis pulvon kaj kuglegojn dum dudek minutoj.

Sed strange: nek la pereo de matrosoj ĉe Sosnovco, nek la perdo de du ŝipoj el la eskadro, nek la ŝtormo, nek la trafaj pafoj de la bordo faris specialan impreson al la dungitoj. Rusaj preĝejoj kaj kortoj de riĉaj rusaj komercistoj, malnova Ĥolmogoro kaj Arĥangelsko estis nun tute proksime. Kaj tio, ke soldatoj kaj matrosoj iĝis malpli multaj, neniom afliktis tiujn, kiuj restis vivaj: pli konserviĝos da riĉo por tiuj, kiuj atingos la urbon, pli riĉa estos ilia akiraĵo, pli dense ili plenigos siajn sakojn kaj kofrojn.

Nun nemultaj babilis pri kolero de sankta Brigita kaj pri

insidoj de la mara demono. Milito estas milito, diradis la dungitoj, en milito okazas ĉio. Kiu estas pli stulta — tiu pereas, kiu estas pli saĝa — tiu ne nur postvivas, sed ankoraŭ pliriĉiĝas.

Por ke pli rapide forgesiĝu la malfacilaĵoj de la ekspedicio, grafo Gyllenstierna ordonis al la eskadra trezoristo doni soldon al ĉiuj — de ŝipestroj ĝis kajutaj ŝipknaboj. La monon, kiun devis ricevi la mortintoj, estis ordonite disdoni al la vivantoj. Tio ankoraŭ plifirmigis la spiriton de la dungitoj. Sur la ŝipoj, ĉe disdono de vinaj porcioj, la matrosoj kriadis gloron al la reĝo kaj laŭdadis sian admiralon.

Ne indus perdi tempon, sed la ŝipoj bezonis riparon, kaj la subadmiralo ordonis komenci laborojn. Ŝipaj ĉarpentistoj, forĝistoj kaj kalfatristoj laboris konscience, urĝataj de matrosoj kaj soldatoj, kiuj ne povis atendi por penetri en Arĥangelskon. Sed tamen la riparado iris malrapide, — tro taŭzis la eskadron la ŝtormo.

Sinjorino Gyllenstierna enuis, kolonelo James, ŝlosinte sin en sia kajuto kun Golgolsen, drinkadis brandon; la subadmiralo ne foriradis de la pobkastelo, dum horoj rigardadis per lorno al la senhomaj minacaj bordoj, kunpremadis la lipojn, balancadis la kapon. Kaj ankaŭ Urquhart iĝis lastatempe pensema kaj malgaja. Nur kun kolonelo James li fojfoje faciligadis la animon: ambaŭ ili tamen ion sciis pri Moskvio...

Vento ne leviĝadis. La maro estis kalma, staris stranga sufoka silento. Matrosoj sur «Krono» kantis:

Ne timis li juĝon, rabante sur voj',
Atakis en nokt' kaj vesper',
Tranĉadis senkulpajn li homojn kun ĝoj',

Enfosis vivantojn en ter'...

En tagmezo, post manĝo, grafo subadmiralo eniris en sian kajuton. Sinjorino Margret, ventumante sin per ventumilo, diris neglekte:

— Mi, kiel vi scias, havas amikon de infaneco, malnovan amikon Lars-on, Lars Des-Fonteines — tia estas la nomo de tiu homo. Oni punis lin pro tio, ke li supozis en la rusoj kuraĝon kaj deziron rezisti al malamiko. Ĉu ne ŝajnas al vi nun, ke Lars Des-Fonteines estas tute prava?

La matrosoj kantis laŭte, ilia kanto aŭdeblis sur ĉiuj ŝipoj de la eskadro:

Ho, se Di-sinjor' korfavorus al ni,
Kaj lasus reveni al hejm':
Mi templon konstruus el ŝtono kun pi',
Kaj plumbe ĝin kovrus mi mem...

— Ĉu, laŭ vi, Des-Fonteines estis prava? — demandis grafo Gyllenstierna, akcentinte la vorton «estis».

Klininte la kapon flanken, ne palpebrumante li rigardis al la edzino per siaj flavaj okuloj. Ŝi eksentis timon, malfacile leviĝis, mallerte krocîs per la maniko kristalvitran vazeton. La vazeto frakasiĝis.

— O ho! — prononcis la subadmiralo. — Vi perdis vian naturan gracion!

— Estis? — kriis ŝi. — Kion vi volas diri per tio?

— Lars Des-Fonteines ne plu ekzistas, — dise kaj klare diris Gyllenstierna. — Li ne vivas en la mondo. Lars Des-Fonteines antaŭ longe iĝis cindro.

Sinjorino Margret sufere mienis, kiel oni mienas pro subita tondro. Ŝiaj lipoj tremis, la vizaĝo tordiĝis. Ĝi ĉesis esti bela, la vizaĝo de sinjorino Margret...

De sur la ferdeko aŭdiĝis:

Kaj kiam aŭdiĝis de li lasta vort',
Lin kovris malluma inund',
La ŝip' kun la mastoj ekkrakis kun fort'
Kaj dronis al nigra profund'...

— Ĉu Lars mortis? — demandis sinjorino Margret.

— Jes. Li forpasis.

— Vi mensogas! Lars estas en Arĥangelsko! Vi mem diris...

— Ĉu ĝuste tial vi ekiris kun mi en Arĥangelskon?

La sinjorino eksilentis. La subadmiralo ridetis. Tiel gaje li ridetis dufoje: kiam li iris al altaro kun sinjorino Margret kaj jen nun.

— La ĉefleŭtenanto senglore kaj tre rapide trapasis sian vivan vojon, — estis diranta Gyllenstierna, malfermante per ŝlosilo skatolon, garnitan per kupraj bendoj. — Tiu diboĉulo, evidente, ne tro alte taksis siajn amikojn de infaneco kaj hastis foriri de ili en alian mondon...

Li levis la kovrilon de la skatolo kaj elprenis paperon — mallongan mesaĝon pri morto de bagnulo Des-Fonteines, alnomata Ŝilingo, okazinta en la galera floto de lia reĝa moŝto. La korpo de la kondamnito estis sepultita en maro, laŭ la regularo.

Sinjorino Margret legis la paperon unu fojon, poste alian. Grafo Gyllenstierna eliris sur la pobferdekon, por refreŝiĝi. Li

estis tre gaja kaj afable konversaciis kun Urquhart pri vetero kaj pri tio, ke ĝis vespero, eble, ili sukcesos levi la ankron. Reveninte post ioma tempo en la kajuton, la subadmiralo diris al sia edzino:

— Vi faris grandan vojaĝon kaj, bedaŭrinde, ne vidos vian amikon. Probable, por vi nun ne sencas riski... Du ŝipojn ni lasas ĉi tie por ajna okazo. Ĉu vi transloĝiĝos sur unu el ili? Tie estos pli sekure.

— Jes, mi konsentas, — per indiferenta voĉo respondis sinjorino Margret.

Ŝi plu tenis en la mano la mesaĝon pri la morto de bagnulo Ŝilingo.

— Vi estas prudenta, — diris Gyllenstierna.

Margret strange ridetis.

— Ho jes, mi estas prudenta! — prononcis ŝi multsignife.

— Por vi ĉi tie estos pli trankvile.

— Ĉiuokaze, mi ne pereos! — plu kun la sama rideto diris sinjorino Margret. — Mi revenos en Stokholmon kaj longe kaj feliĉe vivos tie kiel vidvino de la glore pereinta subadmiralo grafo Gyllenstierna, ĉar vi, *herre*, nepre perdos ĉi tie vian kalvan kapon. Ĉu ne?

Li ne trovis, kion respondi, nur forte kunpremis la makzelojn. Kaj ŝi plu diris, ridetante kaj defie rigardante al li per siaj diafanaj okuloj:

— Mi estados ĉe la kortego, mi estas ankoraŭ juna, ĉu ne? Juna kaj bela. Kaj vian nomon mi faligos en koton tiel, ke eĉ en la alia mondo vi skuiĝados, mia forpasinta edzo. Ĉu vi

maltrankvilis pri via honora nomo kaj tial murdis Lars-on?

Lia vizaĝo tordiĝis pro furiozo, li paŝis al ŝi, krude kaptis la manon.

— Lasu min! — flustre ordonis Margret. — Lasu, aŭ mi krios kaj batos vin en ĉies ĉeesto...

Ŝi elŝiris la manon, deiris, diris el malproksime:

— Kaj tiam ni estos kvitaj! Nur tiam! Mi jam aŭdas tiun ĥoron de voĉoj: «Ho, sinjorino Gyllenstierna, la vidvino de admiralo Gyllenstierna, kion ŝi faras! Kompatinda maljunulaĉo, liaj ostoj eĉ renversiĝas en la ĉerko!»

Ŝi foriris kaj ŝlosis sin en la dormoĉambro. Li provis rompi la pordon, Margret diris trankvile:

— Ne estu ridinda, se tio estas ebla por vi!

Ĝis la kvara posttagmeze ĉiuj laboroj en la eskadro estis finitaj. Grafo Gyllenstierna ordonis al Urquhart:

— Transdonu al la ŝipanaroj dankon de ilia admiralo. Hodiaŭ ili ricevu duoblan glason da vodko. Post tio — levu la ankrojn. En la buŝo ni penos kiel eble pli rapide venki la doganistojn, penetros en Dvinon kaj matene, kun Dia helpo, komencos elŝipigon de trupoj en Arĥangelsko.

— La doganistoj, evidente, scias pri nia eskadro...

— Des pli malbone por ili...

Vespere malgranda nubeto, aperinta sur la horizonto, kreskis, sur ondoj ekkuris ŝaŭmaj krestoj, la ĉielo malsereniĝis, komenciĝis pluvo, sed plu estis sufoke. La subadmiralo ordonis

doni al si mantelon kaj ne foriris de la pobferdeko. Li iĝis ankoraŭ pli flava, ol matene, liaj lipoj sekiĝis, la manoj rimarkeble tremis.

— Du fregatoj — «Fenikso» kaj «Dromedaro» — atendos nin ĉi tie, — diris la subadmiralo al Urquhart. — Ĉu vi aŭskultas min?

— Jes, *herre* subadmiralo, mi atentas.

— Sur fregaton «Fenikson» transiros mia edzino. Mallevu la velboaton.

— Jes, *herre* subadmiralo...

Sinjorino Gyllenstierna leviĝis sur la pobferdekon, por adiaŭi la edzon. Dum tiuj horoj ŝiaj vangoj kaviĝis, sub la okuloj kuŝiĝis bluaj ombroj. La subadmiralo rigardis al Margret per pika, ia mira rigardo. Ili ne diris unu al la alia eĉ unu vorton.

Kolonelo James petis permeson akompani la sinjorinon sur «Fenikson». Lia fizionomio estis eĉ pli langvora, ol kutime. Gyllenstierna diris al li ĉe la ŝtuparo:

— Ne forgesu reveni, *herre* kolonelo.

Matrosoj el malproksime rigardis al la edzino de la subadmiralo, al ŝiaj kofroj, al la nigra servistino. Ekzekutisto Svante Bagge diris, ke ĉio estas por bono. Se en la eskadro estis malagrablaĵoj, do nur pro la virinoj. Nun ĉio iros bonege, la subadmiralo estas ruza oldulo, li scias, kion li faras...

Sinjorino Gyllenstierna, retenante per la fingroj la jupojn, malleviĝis en la velboaton, kajuta ŝipknabo, kajuta vaĉanto kaj Jakobo portis post ŝi kusenojn, tapiŝon, ledojn, por aranĝi por

ŝi kajuton sur «Fenikso», korbojn kun manĝaĵoj, liuton. La velboato foriris.

Gyllenstierna plu staris sur la pobferdeko de «Krono», kiam kolonelo James revenis de la fregato. La ankroj estis levitaj. La kolonelo diris al la subadmiralo:

— La sinjorino petis transdoni al vi, *herre* subadmiralo, ke ŝi senĉese preĝos pri vi.

Grafo Gyllenstierna respondis nenion.

La malsekajn velojn de la flagŝipo estis pleniganta vento. Laŭte, per malamikaj voĉoj, raŭke kriadis mevoj. Matrosoj sur la pruferdeko kantis malnovan kanton:

Ŝipon pelas la vent' oceana,
Di', indulgon al mia anim'...

Ĉapitro kvina

> Gardo estas la plej grava servo, kiun soldato en armeo plenumas.
>
> *Petro I*

1. Malbona mateno

Silvestro Petroviĉ estis skribanta leteron en Moskvon, al Apraksin. Trans la fenestroj de la Sepurba domo estis verŝiĝanta senĉesa, kiel en malfrua aŭtuno, pluvtorento. En la vestiblo, trenante botojn, tusante, insultante unu la alian, iradis homoj, knaradis la pordo sur sia rulbloko, ploregis juna virino, iu estis konsolanta ŝin per raŭka baso.

Ne finskribinte, Ievlev prenis la bastonon kaj eliris sur la peronon. De la maro blovis humida vento, la pluvo subite ĉesis, nur de arboj ankoraŭ flugis gutoj. Sur la perono atendis Jegorĉjo.

— Konduku! — ordonis Silvestro Petroviĉ.

Jegorĉjo plonĝis en amason de kampuloj, elkondukis el ŝedo kulpulojn. La amaso disiĝis, la tri homoj, ligitaj per zonoj, sen ĉapoj, hirtaj kaj en ŝiritaj vestoj, riverencis al la kapitan-komodoro. El la vestiblo, viŝante la buŝon per la polmo, haste finmaĉante ion, elkuris kancelariano Abrosimov.

— Parolu! — ordonis al li Ievlev.

Tiu aliris pli proksime, elmetis la piedon, komencis kun malaprobo en la voĉo longe rakonti, kiel okazis murdo, kiu estis la iniciatinto, kiu batis la teniston per ligna plato al la

kapo, kiel la tenisto kaptis hakilon, sed malfrue — li finis sian vivon. Ievlev aŭskultis, frapetadis per la bastono sian bototubon. La viroj apogadis sin jen sur unu piedo, jen sur la alia, suspiradis...

Silvestro Petroviĉ iris en la tenejon, rigardis al la malviva korpo, kiu kuŝis sur la tabula planko, kovrita per tolo, revenis, komencis demandi la kaptitojn. La viroj, interrompante unu la alian, konfesis, ke tro multe ŝtelis la damnita tenisto, ripozu li en paco, serpento malica, tute nenian manĝaĵon li donadis por la brigado, du tagojn ili kun velboato atendis, dum homoj en la fortikaĵo ŝelon anstataŭ pano per ŝtonoj disfrotas kaj bakas. Hieraŭ ili drinkis iomete, Kosmo-ĉarpentisto komencis konversacion kun la tenisto: kial li ne laŭ Dio faras? La tenisto Kosmon puŝis al la suna plekso, kaj poste per la piedo batis. Kosmo ankoraŭ demandis: por kio vi batas, kripligas, por kio vi puŝas?

La juna virino en la vestiblo ekplorĝemis pli laŭte. Ievlev ordonis forigi ŝin. Matrosoj forkondukis la junulinon flanken.

— Nu kaj mi batis! — raŭke diris Kosmo mem. — Batis kaj batis!

— Ĉu tiel batis, ke mortigis? — demandis Ievlev.

— Do kio? Ĉu rigardi al li, anatemito? — miris Kosmo. — Mi kun la edzino sur la velboato venis, kaj li al mi pri la edzino vortojn diras. Vi, diras, lasu al mi la virinon por ludi, kaj mi, diras, por vi manĝon por la fortikaĵo laŭ Dio donos... Mi bedaŭras, ke nur lin solan mi batis, sed ne ĉiujn ilin...

— Kiujn do «ilin»? — demandis Ievlev.

— Ja tiujn! — kraĉinte, diris Kosmo. — Ĉiuj scias kiujn...

Grizhara hirta viro riverencis, diris timide:

— Vi lin, patro, nutranto nia, ne aŭskultu, stulta li estas, juna, malklera...

— Kiujn do «ilin»? — kriis Ievlev. — Parolu!

Kosmo ne respondis, rigardis al Ievlev sentime, kun malamo. La juna virino, forŝirinte sin el la manoj de la matrosoj, kun strida krio ekkuris al la perono, falis sur la genuojn en likvan koton, kaptis Ievlev-on je la piedo.

— Lasu min! — ordonis Silvestro Petroviĉ. — He, lasu...

Al la piedo estis dolore, li ne povis liberiĝi. La matrosoj denove detrenis la virinon. Tiam la maljunulo kun grizaj hirtaj haroj komencis malleviĝi sur la genuojn. Silvestro Petroviĉ diris tra la dentoj:

— Pelu ilin for el ĉi tie!

— Kiujn? — ne komprenis kancelariano Abrosimov.

— La ligitojn — for el la korto! — ordonis Ievlev. — Malligu!

Kaj eksplodinte kriis:

— Ĉu vi estas surdaj? Mi diras — for! Malligu kaj per puŝoj — tien, de kie ili venis!

La maljunulo, ne komprenante, falis sur la genuojn, la homamaso ekzumis, iu per alta gaja voĉo kriis:

— Ja Dio! Vin oni liberigas! Ĉu vi aŭdas, Kosmo? Liberigas!

Jegorĉjo ĵetis rigardon al Ievlev, vokis la matrosojn, tiuj komencis malligi al la viroj la manojn. Kosmo tute paliĝis.

Ievlev turniĝis, ekiris en la vestiblon; Abrosimov, snufante, ekiris post la kapitan-komodoro, grumblante dum irado, ke tiel ne taŭgas fari, tiel oni ĉiujn tenistojn mortigos per hakiloj; rezultas, ke kontraŭ murdintoj nun eĉ ne ekzistas juĝo.

— Se oni ŝtelistojn hakmurdos — ne estos priplorinde! — respondis Ievlev.

Frapferminte la pordon antaŭ la nazo de la kancelariano, li ree eksidis al la tablo — skribi la leteron plu, sed venis Jegorĉjo.

— Kion vi deziras? — ne levante la kapon, demandis Silvestro Petroviĉ.

— Li ne foriras! — diris Jegorĉjo.

— Kiu ne foriras?

— Ne foriras. Tiu, kiu la teniston mortigis.

— Do diablo lin prenu, se ne foriras — do ne foriru! — subridis Silvestro Petroviĉ.

— Sur la perono li sidas.

Silvestro Petroviĉ silente skribis. Jegorĉjo prenis tranĉileton, komencis akrigi plumojn. Trans la fenestro malheliĝis, ree verŝiĝis pluvo.

2. Frato kaj fratino

Ĉe la bariero en la enveturo en la urbon kapitano Krikov deĉevaliĝis kaj ordonis seli por si alian ĉevalon. La nigra, de kiu li deseliĝis, estis malfacile movanta la flankojn, ronketante pro laco. Dragono elportis por Atanazio Petroviĉ el la gardistejo kruĉeton da akvo, aliaj du selis muskoloran kun

makuloj ĉevalinon. Kaporalo subtenis por Krikov la piedingon, li facile eksidis en la selon, reordigis sur si la malsekiĝintan sub pluvo mantelon, penseme diris:

— Jene, Paŭlo Ivanoviĉ! Venis nia tempo. Observu severe, ke ĉiuj gardistoj estu pretaj, neniun forliberigu de la bariero! Ĉu viaj kanonistoj estas ĉi tie?

— Ĉi tie! — respondis la liphara kaporalo.

— Ili el la gardistejo nenien iru...

Aliaj dragonoj, aŭdinte la konversacion, aliris pli proksime. Luciano Zenin, kun kiu Krikov en pasintaj tempoj ĉasadis, demandis de la perono de la gardistejo:

— Ĉu ili estas ĉi tie, Atanazio Petroviĉ?

— Ĉe Mudjugo. Ĉe la ankroj staras...

— Ĉu ili estas fortaj?

— Ni vidos, Luĉjo! — respondis la kapitano. — Dume mi la solan aferon scias — trivis ilin la malbona vetero... Nu, vivu, knaboj!

Kaj li facile batis la ĉevalinon per la skurĝo. La ĉevalino paŝis sur la loko per la hufoj, ofendite movis la orelojn kaj tuj ekiris per bona facila troto. Ree bruis tondro, pluvo ĉesis por momento, poste ekverŝiĝis kun duobla forto, tiel ke la urbo kvazaŭ malaperis, enfalis trans la muro de la pluvtorento. La ĉevalino iris glate, balancante la kapon, Krikov ankoraŭ spronis ŝin, ŝi de la troto transiris al egalmezura forta galopo. Likva brila koto ŝmacadis sub la hufoj. Atanazio Petroviĉ, forturninte la vizaĝon de la vipanta pluvo, malserene pensadis...

Deseliĝinte en la korto de la nun senhomiĝinta dogana

domo, li per rapidaj paŝoj eniris en la tenejon, kie estis konservata vintre la armilaro de la dogana gardantaro, subapogis la pordon per peza benko kaj, fiksaŭskultinte, ĉu ne estas iu proksime, abrupte tiris ringon de luko, kiu kondukis en malgrandan, masonitan kelon. Ĉi tie Atanazio Petroviĉ palpe kalkulis trian brikon de tria vico demalsupre, elprenis ĝin kaj ŝovis la manon en la kaŝujon, kie en ĉizita, pure rabotita el betula plato skatolo kuŝis papero, volvita kaj enkudrita en vaksitan tolon. Kaŝinte reen la skatolon kaj ferminte la kaŝujon per la briko, Atanazio Petroviĉ leviĝis supren kaj ekrajdis al Muskoj al la domo de Rjabov.

Delonge ne estis li ĉi tie, kaj lia koro por momento kunpremiĝis, kiam li ekvidis sur la perono Taisja-n kun sitelportilo kaj du siteloj da akvo. Ŝi turniĝis al knaro de la barilpordeto kaj tuj, facile mallevinte la sitelojn, ekiris renkonten al li.

— Jen ne atendis mi! — per ĝoja rapidparolo diris ŝi. — Ne bone vi faras, Atanazio Petroviĉ, ne konvene vi faras! Kiu tion vidis — malaperis la kapitano, ne eblas voki lin, kiom da fojoj ni por li sendadis, sed li ne venas. Ivano Sabateiĉ eĉ kiomfoje demandadis — kien malaperis Atanazio Petroviĉ, ĉu li iĝis tro fiera...

— Nu, tro fiera! — svinginte la manon, respondis Krikov. — Tro fieras mi, tion ĉiuj scias. Ĉu vi bone vivas, Taisja Antipovna?

Kaj li ekrigardis rekte en ŝian vizaĝon, maldikiĝintan, kun malpeza ombro sub la okuloj, ekvidis la malgrandan orelon kun turkisa ornamaĵo, ekvidis tremantan feliĉan brilon de ŝiaj pupiloj, la rozkolorajn, iomete ŝvelintajn lipojn.

— Bone, — nelaŭte respondis ŝi, — estas peko plendi, Atanazio Petroviĉ. Kaj vi kiel? Sed kial ni staras ĉi tie, ja ni ne estas senhejmaj, ni iru en la domon. Ankaŭ Ivaĉjo ĉiam demandas: kio pri oĉjo Ataĉjo, kaj kie estas oĉjo Ataĉjo...

Ŝi estis feliĉa, kaj ŝi hontis antaŭ li pro sia feliĉo, pro sia trankvileco, sed hipokriti ŝi same ne scipovis. Li leviĝis kun ŝi sur la peronon, prenis la sitelojn en la manojn kaj eniris en la vestiblon. Taisja larĝe malfermis la pordon en la domon kaj gaje diris:

— Ivaĉjo, vidu, kiu al ni venis!

La knabo impetis de la benko, forte frapante per siaj ferumitaj botetoj, kaj post la kuro ekpendis sur Krikov. Tiu levis lin kaj, kunpreminte la makzelojn, sen fortoj diri ion, longe rigardis en la okulojn de Ivaĉjo, poste suprenĵetis lin al la plafono, kiel faradis ĉiam, renkontiĝante kun li, kaj sidigis lin sur la benkon, mem eksidis apude, brakumis lin je la ŝultroj. Ivaĉjo alpremiĝis al Krikov, per ofendita voĉo plendis:

— Vi ĉiam ne venas kaj ne venas! Jen kia! Kanonon vi promesis kun mi fari, por ke ĝi pafu, sed mem ne venas!

— Jam faros ni kanonon! — promesis Krikov. — Ĝi estas ĉe mi preskaŭ farita, sed mankis tempo la afuston por ĝi eltranĉi.

— Kaj ĝi pafas? — demandis Ivaĉjo.

— Bonege pafas!

— Ĉu laŭte? — ruĝiĝante pro feliĉo, demandis Ivaĉjo kaj per la manoj turnis al si la vizaĝon de Krikov. — Pafas?

Atanazio Petroviĉ respondis ne tuj, fiksrigardante la freŝan,

ruĝvangan vizaĝon de la knabo. Strange kuniĝis en li la patro kaj la patrino: bona belo de la animo de Taisja kaj gaja racia forto de Rjabov; la verdaj, kun fajreroj okuloj de la rudristo rigardis tiel, kiel rigardas Taisja, kaj la rozkoloraj karesaj lipoj de la patrino ridetis tiel, kiel ridetadis la rudristo, — moke, ruze.

— Kial vi silentas? — kolerante kaj kuntirante la maldikajn Taisja-jn brovojn, demandis la knabo. — Ĉu laŭte ĝi pafas do?

— Tute laŭte! — ridetante, respondis Atanazio Petroviĉ. — Pli laŭte, probable, ne okazas...

Demetinte Ivaĉjon de la benko, li diris al li afereme:

— Jen kio, amiko. Kuru al la pordego kaj rigardu tie al mia ĉevalo — ĉu ĝi ne deligiĝis. Kaj se vi deziras, ankaŭ panon al ĝi portu...

Ivaĉjo kuris al la pordo, Atanazio Petroviĉ elprenis el la poŝo la paperon, etendis al Taisja, ekparolis haste:

— Kaŝu, Taisja Antipovna, — tio estas petskribo. Eble, post paso de tempo ĝi taŭgos por bonaj homoj, kaj mi ne plu havas al kiu ĝin lasi. La petskribo al caro Petro Aleksejeviĉ pri ŝtelado kaj koruptado de princo Prozorovskij kaj de ĉiuj liaj kruelaj hundoj. La subskriboj sub ĝi estis skribitaj per sango. Sendi nun al Moskvo — estas afero nemalfacila, sed ke ĝi en la carajn manojn trafu — jen kie lerteco necesas, kaj mankas tia fidela homo. Kaj post la batalo ĉio povas okazi. La rudristo do kie estas?

— Al Onego li iris, al sia amiko, — mallaŭte diris Taisja.

— Al Onego? Kiun do li tie havas?

— Ja Dio scias. Ŝajne estas iu. Festeni li iris...

— Do al li ĉi petskribon vi fordonos, li kaŝos saĝe.

Taisja ĵetis rigardon al Krikov, demandis:

— Eble, pli bone al Silvestro Petroviĉ?

— Silvestro Petroviĉ estas de la sama radiko, kiel la vojevodo! — diris per obtuza voĉo Krikov. — Silvestro Petroviĉ estas homo racia, honesta, kuraĝa, sed kaj Prozorovskij-oj, kaj Ievlev-oj de unu sama tablo manĝadis, se ili kverelos, tiam paciĝos. Pri ĉi petskribo mia kredo estas nula, sed la volo ne estas mia, — la popolo plu esperas kaj en la espero pri justo iros pro ĝi sur eŝafodon. Kiel do mi tielan malfeliĉon fordonu ne en la malfremdajn manojn?

Taisja nenion respondis.

Li tute mallaŭte petis:

— Se okazos io — al Forĝisto fordonu, Taisja Antipovna...

— Kiel — se okazos io? — ne komprenis ŝi.

— Milito. La svedo venis. Ĉu vi ne aŭdis?

— Kiel venis? Kien?

— Ja al ni venis! — malgaje ridetinte, respondis Atanazio Petroviĉ. — Por gasti. Trivis lin la ŝtormo forte, nun li ripariĝas apud Mudjugo...

— Venis tamen! — oĥis Taisja. — Militi venis...

Atanazio Petroviĉ silente leviĝis, serĉis sur la benko la gantojn, riverencis al Taisja. Ŝi rigardis al li, sed kvazaŭ ne vidis. Poste ŝi subite kun forto kaptis lin je la malmola maniko de la kaftano, altiris al si, demandis:

— Kiel do vi, Atanazio Petroviĉ, en la skansoj? Ĉu vi la unua komencos?

— Tiam ni vidos! — trankvile respondis li. — Nia afero estas soldata. Militista ĵuro. Sed ne gravas, Taisja Antipovna, estu trankvila. Ne trabatos sin la latrono en la urbon...

Ŝi plu rigardis al li ne deŝirante la okulojn, kaj ree demandis per tremerinta voĉo:

— Sed vi ja — la unua?

Krikov silentis. Tiam ŝi rapide, lerte malagrafis sur la kolo hoketojn, ektiris arĝentan ĉeneton kaj komencis demeti de si la baptokruceton. La haroj implikiĝis en la ĉeneto; sulkiĝante pro doloro, Taisja tiris pli forte kaj donis al Krikov la kruceton, ankoraŭ varman pro ŝia varmo. Kuntirinte la brovojn, li malbutonis sur si la kaftanon kaj donis al ŝi la sian — kupran, sur fortika peĉita ŝnuro. Palaj pro emocio, ili longe silentis, ne sciante, kion diri unu al la alia.

— Nu, adiaŭ nun! — diris Atanazio Petroviĉ.

— Adiaŭ, frato! — diris ŝi. — Vi ja nun estas frato por mi. Kruca frato! — ripetis Taisja, kaj ŝiaj okuloj eklumis per milda kaj karesa lumo. — Adiaŭ! Lasu, mi vin krucosignos...

Ŝi trifoje krucosignis lin, leviĝis sur la piedpintojn kaj, preninte lin je la ŝultroj, kisis al la lipoj — la solan fojon en la vivo. Kaj li ŝin kisis, poste ridetis amare kaj bonkore kaj diris kun suspiro:

— Fratino! Kiel ruzaj vi estas, Evaj idinoj! Ho, kiel ruzaj!

En la korto li adiaŭis al Ivaĉjo, malsekiĝinta sub pluvo, promesis baldaŭ liveri la kanonon kaj facile enseliĝis.

Trankvile kaj glate batis lia koro, kiam lastfoje li retrorigardis al la alta barilo, trans kiu susuris sub pluvo la sorpujoj.

3. La svedoj venis

En la korto de la Sepurba domo Atanazio Petroviĉ ĵetis la kondukilojn al ĉevalisto, elkurinta el la ĉevalejo, en la vestiblo deĵetis la pezan, malsekiĝintan mantelon, pendigis la trikornan ĉapelon, glatigante la harojn, malfermis la pordon. Ievlev, malalte kliniĝinte super la tablo, estis skribanta. Levinte la kapon al knaro de la pordo, li laŭ la vizaĝo de Krikov divenis, kio okazis, sed ne demandis, atendis. Atanazio Petroviĉ salutis, eksidis sur la benkon kaj nur tiam diris:

— Venis la eskadro, sinjoro kapitan-komodoro.

— Kiaj flagoj?

— Flagoj estas diversaj, svedaj ne videblas. Estas kaj Nederlandaj, kaj Bremenaj, kaj anglaj. Kanonajn paftruojn mi same ne vidis, kvankam mi rigardis per lorno kaj gvatanton sendis en trunkoboato — kaŝe esplori. La ŝipoj de la ŝtormo estas trivitaj konsiderinde, ili metas novan ŝnuraron, — mi pensas, ke da laboro al ili estas nemalmulte, dum ili ne estos pretaj — en la buŝon ne iros...

Silvestro Petroviĉ vokis Jegorĉjon, ordonis kolekti sen prokrasto ĉiujn oficirojn por konsilio. Jegorĉjo forkuris. Ievlev, atendinte, ĝis liaj paŝoj ĉesos, aliris pli proksime al Krikov, demandis:

— Atanazio Petroviĉ, ĉu vi la spadon ĉi tie, en ĉi ĉambro, kisis?

Krikov respondis trankvile:

— Kisis, sinjoro kapitan-komodoro.

— Kaj ne forgesis ĝis hodiaŭ?

— Ne forgesis, kaj dum mi estos viva — ne forgesos mi tiun tagon.

— Ĉu vere vi diras?

— Vere! — kun la sama trankvilo kaj digno en la voĉo respondis Atanazio Petroviĉ.

Ievlev paŭzis, poste ekparolis, ne rigardante al Krikov:

— Antaŭnelonge, kiam vi estis en inspektado, venis en la citadelon princo-vojevodo. Multaj aferoj estis diritaj, kaj ankoraŭ krom ĉio ankaŭ tio, ke en la torturejo, sur la pendigilo, kelkaj latronoj konfesis, kvazaŭ, kiam la svedoj al la urbo aliros, — tiuj latronoj alarmon sonorigos kaj frate akceptos la svedon. Nomitaj estis de la latronoj Silentulo, Gridnev Eŭtimio, Forĝisto Teodozo el skismuloj, kiun mi fidis kaj anstataŭ fremdlandano Ripley komisiis kanonojn gisi. Ankoraŭ estis nomitaj kiel latronoj Hermilo kaj Kapulo kun kamaradoj. Diris plue la vojevodo, ke kvazaŭ ekzistas inter la latronoj kaj ilin gvidas iu oficiro. Kaj la latronoj kvazaŭ estas multegaj — ĉie ili estas, kaj en ŝipkonstruejoj, kaj en antaŭurboj, kaj ŝarĝistoj estas, kaj kalfatristoj, kaj kupristoj, kaj panfaristoj, kaj soldatoj, kaj kanonistoj...

Krikov subite ridetis.

— Se la latronoj tiom multas — kial ne faligis ili la vojevodon? — demandis li. — Kiel li pri tio pensas?

Kaj li mem respondis:

— Ne, Silvestro Petroviĉ, mensogas la kara princo,

ofenditoj multas — tio estas vero, sed ne tiom ili estas lertaj, kiel al la vojevodo pro timo ŝajnas.

Silvestro Petroviĉ, kvazaŭ ne aŭskultante Krikov-on, estis diranta la sian:

— Pensis mi tiel: kredi blinde al la vojevodo — signifas neniun propran homon fidi eĉ je grajno. Kaj se ne fidi — tiam batos nin la svedoj. Kaj ne kredis mi al la vojevodo: ne kredis, ke estas ĉi tie almenaŭ unu oficiro, kiu, rompinte la sanktan ĵuron, transiri al la malamiko povas. Ne kredis, ke kiam oni sonorigos alarmon — iros homoj kontraŭ mi mem kun palisoj, iros por tio, ke la svedo en la urbon penetru kaj komencu edzinojn kaj patrinojn, maljunulojn kaj infanetojn tranĉi kaj bruligi per fajro. Ne kredis kaj ordonis samtiam ĉiujn el la torturejo forliberigi kaj tiun damnitan lokon per seruro ŝlosi. Kaj nun mi subite pensis: al kiu mi kredis?

Krikov respondis trankvile:

— Al rusaj homoj vi kredis, sinjoro kapitan-komodoro, kaj pro tiu via kredo multaj bonajn vortojn diras ne nur en la urbo, sed eĉ al mi en la skansojn ili alflugis. Ni ne estas proksime, sed ankaŭ ĉe ni pri tiu via bona faro ĉiuj parolas — kaj miaj doganistoj, kaj iuj kampuloj fiŝistoj, kaj dragonoj. Bone vi faris, sinjoro kapitan-komodoro. Lasu la popolon spiri, montru al ĝi juston sur la tero, sed ne nur en la ĉielo de Dio — vi mirados pri ĝiaj mirakloj. Bastonoj, knuto, torturoj — Dio favora, eĉ paŝon ne eblas fari, por ne trafi en malfeliĉon. Nu, ŝtelis ulo panpecon, por kio do haki al li la manon? Ĉu pro sia bona vivo li ŝtelis? Pro malsato li ŝtelis...

— Por kio vi pri tio? — kun suspekto en la voĉo demandis Ievlev.

— Por tio, ke necesas esti mizerikorda al nia popolo. Sed tiaj, kiel la vojevodo...

— La vojevodo de la caro estis enpostenigita, kaj ne ni, ne vi kaj mi, lin juĝu! — tranĉis Ievlev.

Krikov severe ekrigardis al li:

— Tion mi jam ne la unuan fojon aŭdas, tamen mi pensas, kial do, Silvestro Petroviĉ, ne ni? Per kio ni estas malbonaj? Vi kredu, sinjoro kapitan-komodoro: diversaj estas homoj, laŭ diversaj vojoj en Rusio oni ĉe ni iradas, ĉiu havas sian sorton; sed ne eblas trovi inter tiu popolo, pri kiu mi diras, — kaj latronon, kaj maliculon, kaj perfidan animon, kiu al la malamiko svedo riverencos... Kaj ne sola mi tiel pensas, multaj...

— Kiuj do multaj? Ĉu tiuj, pri kiuj la vojevodo tiam parolis?

— Ankaŭ tiuj tiel pensas.

— Do vi de kie tion scias?

Atanazio Petroviĉ silentis.

— Do, ĝuste vi estas tiu oficiro, kontraŭ kiu min avertis princo Prozorovskij?

— Tiu, sed ne tiu! — kun trankvila firmeco en la voĉo diris Krikov. — Ŝtelisto kaj koruptulo, profitema kaj maljusta, besto sangavida, ĝis mia morta horo mia plej granda malamiko estas vojevodo princo Prozorovskij kaj liaj kunuloj, eĉ de iu ajn ili estu enpostenigitaj. Sur tio mi staras kaj staros, sinjoro kapitan-komodoro, kaj vi al mi la manon ne svingu, nun necesas ĉion diri, mi ne havas kion kaŝi. Silentulo, kaj Gridnev, kaj Kapulo, kaj aliaj metiistoj — per kio estas pekaj? Ĉu per tio, ke ili

fortojn ne plu havas toleri batadon, kaj kripligadon, kaj maljustecon, kaj malsaton, kaj malriĉecon... Kaj ĉu ekzistas el ili almenaŭ unu, kiu pensus al la malamiko transiri? Mi ja scias, de mi ili ne kaŝiĝas, mi mem estas el ilia gento, mi mem estas kaj nun kun ili, kaj morgaŭ, kaj por ĉiam. Ĉu al vi tranĉilon oni ĵetis? Sed ne al vi ja, Silvestro Petroviĉ! Ĉu vi mem ne scias, kiel homoj ĉi tie turmentiĝis? Ĉu ne memoras vi la ŝipkonstruadon...

La pordo larĝe malfermiĝis, Krikov eksilentis sur duonvorto. Venis la pafista estro Simono Borisoviĉ, Ĥagajo Pustovojtov, Merkurov, Ĵivotovskij, Meĥonoŝin. Estis tempo komenci la konsilion.

— Mi devus al la loko veturi! — morne diris Atanazio Petroviĉ. — Ĉio ajn povas tie okazi.

La oficiroj eksidis sur benkoj laŭlonge de la muroj, Silvestro Petroviĉ deklaris tion, kion ili jam sciis kaj de Jegorĉjo kaj de Meĥonoŝin. Estis trankvilaj ĉiuj, krom Meĥonoŝin, kiu iel eksidis oblikve kaj sidis turbuleme, leviĝante kaj kvazaŭ kolerante al la koncentrita kaj trankvila stato de la kapitan-komodoro mem kaj de aliaj oficiroj.

— Unuavice ni pri la doganistoj parolu kaj pri la dragonoj, kiuj estas en la skansoj, — diris Silvestro Petroviĉ. — Kiel fari?

Kaj, atendinte, respondis mem:

— Per forto haltigi la eskadron la doganistoj kaj la dragonoj ne povos, tion ĉiuj scias. Sed se tiaj cirkonstancoj okazos, ke la latronoj, irantaj sub maskeradaj flagoj, mem dogankontrolon petos, — la doganistoj sur la ŝipojn iru kaj devon sian plenumu

ĝisfine, ĉar Atanazio Petroviĉ disponas soldatojn saĝajn kaj multe da malfeliĉo kaj damaĝo al la svedoj povas kaŭzi, por ke ili kantojn ne kantu kaj la ĝeneralan batalon timu. Al leŭtenanto Meĥonoŝin laŭ nia dispozicio proponas mi en ĉio al kapitano Krikov subordiĝi kaj laŭ lia, de Krikov, signalo iri kun la dragonoj al la doganistoj por helpo...

Meĥonoŝin tiris la kolumon de sia kaftano, knaris per la benko, sur kiu li sidis, kaj kun subrido ekkriis:

— Sed kiel ni al ili helpu, sinjoro kapitan-komodoro, kontraŭ eskadro? Oni hakos nin kaj pluen iros, ili estas forto!

Silvestro Petroviĉ nenion respondis al Meĥonoŝin kaj eĉ ne ĵetis rigardon al li. La pafista estro dismetis la grizajn lipharojn, tuspurigis la gorĝon, ekparolis:

— La dispozicio estas ĝusta, kaj ke hakado estos — tio ne eviteblas. Ĉi latronoj povas de la doganistoj la unuan embarason ricevi, kaj ilia embaraso multe utilos sub la kanonoj de la fortreso. Kaj por leŭtenanto Meĥonoŝin, kiu krucon kisis por ĵuro, ne konvenas kvazaŭ en bazaro marĉandi, sed necesas ekstari kaj adiaŭi, kiel de antikveco avoj niaj faradis, kaj al sia milita loko iri. Iru, sinjoro leŭtenanto...

Meĥonoŝin ekstaris, ĉirkaŭrigardis malamike. Neniu rigardis al li, ĉiuj mallevis la okulojn, krom Ievlev, kiu subite bruske demandis:

— Sed eble, ekmalsanis vi, sinjoro leŭtenanto? Tio okazas! Diru, poste estos malfrue.

La leŭtenanto silente, apenaŭ riverencinte al la konsilio, eliris, lia sabro batiĝis al la pordofosto, preskaŭ tuj klakis sur korto ĉevalaj hufoj. Ekstaris ankaŭ Krikov.

— Se okazos bruo — miaj knaboj en la skansoj pafos per kanono, — ekparolis li per glata voĉo, rigardante al Ievlev. — Ankaŭ kurieron mi sendos kun mesaĝo — ĉu ili mem dogankontrolon petis, aŭ mi ilin haltigis. Eble, Dio helpos per senventeco, en la buŝo okazas nemalofte, — oni ekstaras ankre, venton atendas. Laŭ la kanono vi ekscios, ke ni batalas. Kanono pli rapidas ol rajdisto — de gardanto al gardanto alflugos, de baterio al baterio. Laŭ la kanono vi la alarmon sonorigu.

La kapitan-komodoro kapjesis. Lia rigardo estis esprimanta kontentiĝon, plezuron, eĉ fieron. Krikov reĝustigis sur si la uniformon, korektis la portepeon de la spado, riverencis al la konsilio, diris solide:

— Sur tio mi petas pardonon. Mi ekiras al la loko. Se okazos io — ne memoru malbonon!

— Kaj vi pri ni malbonon ne memoru! — respondis anstataŭ ĉiuj la pafista estro. — Estu certa. Ĝis la urbo ni la latronon ne allasos.

Silvestro Petroviĉ atingis Krikov-on en la vestiblo, diris flustre:

— Nu, Atanazio Petroviĉ, ni ankoraŭ, se donos Dio, revidiĝos. Al diablo en la dentojn vi ne ŝoviĝu, mi vin konas. Kaj pri kio ni hodiaŭ parolis, eble ni iam finos. Multon vi prave diris, sed ne ĉio tiel simple fareblas. Iru, amiko kara...

— Mi iras, Silvestro Petroviĉ!

Ili brakumiĝis. Krikov eliris. La pluvo estis verŝiĝanta plu, glata, forta. Fojfoje briladis fulmoj, bruadis tondro...

Reveninte, Silvestro Petroviĉ elprenis el la poŝo la

dispozicion, laŭtlegis, aŭskultis, kion diris la oficiroj, poste ordonis mallonge:

— Mi supozas tiel, sinjoroj, ke havas ni inter ni plenan konsenton en agoj. Do, ĉiu senprokraste devas iri al sia loko, kiel legis mi en la dispozicio. Ankoraŭ foje mi ripetu: sonoriloj nun restis nemultaj, vi mem scias: ili estas fanditaj por kanonoj. Tiujn, kiuj restis, aŭskultu kun tuta atento. Aŭskultu ankaŭ kanonojn en la bordaj baterioj. Pri ĉio nova mi sciigados sen prokrasto.

La pafista estro Simono Borisoviĉ demandis per densa voĉo:

— Kion fari kun ilia kirko, sinjoro kapitan-komodoro?

— Tio estas afero de subleŭtenanto Pustovojtov! — diris Ievlev. — La fremdlandanoj en la kirko kolektiĝos, — tiel pri ili Loftus-kuracisto denuncis. Kiam ili kolektiĝos — sinjoro subleŭtenanto kun la matrosoj ilin tie tenos ĝis la fino mem. Se ili komencos brui — Pustovojtov ŝajnigos sin nekomprenanta stultulo. Jen la tuta afero... Leŭtenanto Ĵivotovskij sur velboatoj eliros sur Dvinon, la velboatoj havas kanonojn, tiuj kanonoj tenos la ŝipanojn afablaj...

La oficiroj leviĝis, Ievlev ordonis al Jegorĉjo tuj sendi homon stafete al Ĥolmogoro al Atanazio. Jegorĉjo, senĉapa, elkuris sur la peronon — serĉi kurieron al la eminenco. Silvestro Petroviĉ alsidiĝis al la tablo — finskribi finfine la leteron al Apraksin en Moskvon. La oficiroj disiris, li baldaŭ restis sola, nur Jegorĉjo enŝovadis la kapon en la pordon, miradis pri la trankvila vizaĝo de la kapitan-komodoro.

«Kaj ankoraŭ, amiko mia kara, Teodoro Matejeviĉ, — skribis Ievlev haste, makulante la fingrojn, — en antaŭnelonga

tempo ricevis mi ĝustan sciigon: la latronoj estas ĉe ni proksime, okazos batalo. Vere estas dirite: atendu malfeliĉon de maro, embarason de akvo. Tiuj latronoj estas svedoj, sed esperas ni montri tion, kio nomiĝas nun ĉe vi *fermeté*, kaj en nia maniero — rezistemo. Opinias mi, se la latronojn ni ĉi tie batos, tiam estos por ni pro tio granda profito, ĉar malmulte ili ĝis nun estis batitaj, kaj se estis batitaj, tiam nemultaj homoj pri tio scias, dum Narvon ĉiuj memoras. Amiko kara, Teodoro Matejeviĉ, skribu al mi mesaĝon: kion sinjoroj polaj magnatoj de ni volas preni pro alianco kontraŭ reĝo Karolo? Ĉi tie oni diras, ke kvazaŭ Ukrajnion? Do estu ili damnitaj, tiuj sinjoroj! Tian soldaton, kiel nia, ne eblas trovi, vi kaj mi ankaŭ ĉe Azovo tiel diradis kaj ĉe Narvo. Kaj nun multajn miraklojn mi vidis kaj firme staras sur tio, ke ne ekzistas forto, kiu eltenus kontraŭ ni. Kio pri Ŝeremetev? Ĉi tie oni diras, ke sinjoro Schlippenbach forte sin gratas pro li? Donu Dio! Skribu al mi, Teodoro Matejeviĉ, kaj ankoraŭ sendu pli da libroj indaj, kiuj estas pri sciencoj de fortikaĵ-konstruado, pri artilerio, kaj ĉefe — kio estas bona pri la plej dolĉa por ni ŝipa floto. Amiko karega! Konstruitaj estas ĉe ni jam ŝipoj nombre dek tri, — floto! Ĝuste al tiuj ŝipoj ekrigardis la damnita svedo, sed ni ne donos, por ni mem ili necesas. Nu, skribi mi finas, jen kiom mi skribis. Riverencu al ĉiuj niaj, kun kiuj bone la juneco pasis, riverencu ankaŭ al la granda ŝipestro, diru, ke li esperu. Kaj levu tie je nia sano pokalon da bona vino, ĉar en laboro estos la venanta tago...»

Li per sia fingroringo sigelis la leteron, vokis Jegorĉjon, ordonis doni al kancelarianoj. Jegorĉjo forportis la leteron, revenis. Silvestro Petroviĉ estis surmetanta la gantojn.

— Ĉu la velboato estas ĉi tie? — demandis li.

— Ĉi tie! — respondis Jegorĉjo.

— Do ni iru, se ĝi estas ĉi tie.

Kaj ankoraŭ foje pririgardinte la tablon, la benkojn — ĉu ne estas forgesita io necesa, — li, apogante sin sur la bastono, ekiris al la pordo. La pluvo plu estis verŝiĝanta kiel antaŭe, torentoj de akvo fluis de tegmentoj, Dvino grizbruniĝis pro la pluvego.

— Pluvas kaj pluvas! — diris Silvestro Petroviĉ. — Kia somero...

Kiam la velboato debordiĝis, li, starante sur la pobo, rigardis al la urbo, kiun li devis defendi kontraŭ invado. Ĉio estis kvieta, kvazaŭ ne venis la malica svedo: fumis tuboj, ie trans glimaj fenestroj de metiistaj domoj ruĝe lumis kandeloj, en la preĝejoj oni pace sonorigis por vespro.

4. En la citadelo

Inĝeniero Rezen kaj Silvestro Petroviĉ estis bruligantaj sur tabulo pulvon — rigardis, ĉu ĝi tuta forbrulas, kiam la gardantoj sciigis, ke sur Dvino estas videbla la barko de ĉefepiskopo Atanazio, ĝi iras de la buŝo, — la eminenco vizitis la skansojn.

La maljunulo venis severa, laca, li apenaŭ povis iri, apogante sin sur sia bastono. Li rakontis, ke li estis en la skansoj, rigardis per lorno al la latronaj ŝipoj. Dume la eskadro staras senmove, oni faras tie iajn laborojn. La dogansoldatoj kaj la dragonoj al la batalo estas pretaj, per spirito estas fortaj. Ankoraŭ li rakontis, ke en la antaŭa tago li ricevis sciigon de la

Vologda episkopo: kvazaŭ eliris al la dvinanoj el Vologdo sur multaj barkoj bonaj trupoj, pafistoj kun kanonoj. Super ili kiel kolonelo iras fremdlandano Vilhelmo Noble kaj kiel subkolonelo ruso Remezov, batalisto kuraĝa. La trupoj veturigas kun si nemalmulte da kuglegoj, pulvo kaj ĉia alia armilaro.

Ievlev, subridinte, respondis, ke laŭ ĉio videblas — Vilhelmo Noble ne tro hastas al la batalo.

— Sed por kio li hastu? — sarkasmis Atanazio. — Ja ne al festeno, oni povas mortigi... Nu, caro Petro Aleksejeviĉ ekscios, kiel Noble hastas, — ne laŭdos...

— La vojo ja ne estas proksima, mastro. En Totjmo ili drinkos, en Ustjugo refreŝiĝos. Konas ni tiun vojon...

Atanazio forsvingis la ŝercojn, ordonis montri la kanonojn, kiuj estis transfanditaj el sonoriloj, ĉiun pririgardis atente, demandis, el kiu sonorilo ĝi estas gisita, de kiu majstro, ĉu en longa distanco pafos? Silvestro Petroviĉ respondis, ke preskaŭ ĉiuj kanonoj estas de loka gisado, ellaboritaj de majstro Teodozo Forĝisto, saĝa viro kaj scianta sian aferon.

— Sed iam li estis tute pereanta! — diris Atanazio. — Vidu, kia majstro... Ĉu vi lin favore traktis, la majstron?

— Ĉu eblas tian favori? — respondis Ievlev. — Li nur insultas...

— Ĉiu insultus, se oni sur pendigilon levas! — grumblis Atanazio.

Silvestro Petroviĉ miris — ĉion scias la maljunulo. Pririgardinte la kanonojn, Atanazio ordonis montri kuglegojn — gisajn, ferajn, ŝtonajn. Rezen klarigis, kiel oni ardigas

kuglegon en forĝoforno, kiel ŝmiras pulvan ŝargon per argilo, kiel enruligas harditan kuglegon en kanonan tubon.

— Ĉu pulvo estas bona? — demandis Atanazio.

— Pulvo estas nemalbona.

— Vi respondu pri afero! — kriis Atanazio. — Nemalbona! Kio estas nemalbona?

— Sed vi ne kriu, — petis Rezen.

Atanazio palpebrumis, poste demandis:

— Sed vi, stultuleto, ĉu scias, kiu mi estas?

— Vi estas popo, — diris Rezen. — Kaj ne kriu. Mi ne estas tiu, al kiu oni kriu.

— Kuraĝa! — rimarkis Atanazio.

— Jes, kuraĝa!

— Kie estas pulvo?

— Kie necesas! — respondis Rezen.

— Montru al mi la pulvon.

— Por kio al vi pulvo? — demandis Rezen. — Kion vi scias pri pulvo? Vi estas popo — kaj preĝu, kaj mi estas inĝeniero, mi pri pulvo scias...

— Vi estas inĝeniero, sed — fremda, — mallarĝigante la okulojn al Rezen, diris Atanazio, — dum mi estas popo, sed — rusa. Kaj ĉion vidis dum mia vivo. Konduku, Silvestro Petroviĉ, montru...

Rezen iris malantaŭe, sur liaj vangoj aperis ruĝaj makuloj — li ofendiĝis. Atanazio ordonis doni lignan bovlon, frotis en la bovlo pulvan pulpon, rigardis, ĉu ĝi ne estas de griza koloro.

Rezen diris al Ievlev en la germana:

— Li komprenas!

Atanazio respondis same en la germana:

— Mi komprenas!

Kaj ordonis al sia servoknabo doni paperan folion. La servoknabo ne havis paperon, Rezen elŝiris pecon el la notlibreto, la maljunulo metis sur la folion pinĉaĵon da pulvo, bruligis. La pulvo forbrulis preskaŭ sen restaĵo, la papero restis netuŝita.

— La pulvo estas bona, dum vi diras — «nemalbona»! — riproĉis Atanazio al Rezen, sed jam trankvile. — Monaĥoj miaj kie estas?

La monaĥoj el la Nikola-Korela monaĥejo eliris sur la ekzercoplacon sub eta pluvo. Iliaj sutanoj ĉifoniĝis, la botoj triviĝis, la vizaĝoj de ĉiuj estis sunbrunaj, la haŭto sur la nazoj deskvamiĝis pro la suno, multaj forrazis la barbojn, kaj Barsanufo kreskigis lipharojn. Atanazio, kaŝante rideton, benis sian militistaron, nelaŭte diris al Ievlev:

— Kiele! Kaj kun lancoj, kaj kun muskedoj! Ĉu vi ilin instruis?

— Instruis, — same ridetante, respondis Silvestro Petroviĉ. — Barsanufo ĉe ili estas racia viro...

— Ĉu li estas estro super ili?

— Ni nomas lin kaporalo, — diris Ievlev.

— Nu, nu, — diris Atanazio, — bona afero. Vodkon al ili ne donu, mi ilin konas, stalonojn...

Kaj li vokis al si Barsanufon:

— Kia liphara!

Barsanufo silentis, staris en atentopozo.

— Je tabakaĉo odoras! — diris la eminenco. — Kaj lardo malestas. Forigis vi la lardon. Tiel ja estas pli dece por monaĥo...

Barsanufo tusis en la pugnon.

— Nu, iru, filo! — subridis Atanazio.

La monaĥo turniĝis, kiel oni instruis lin, frapis per la trivita boto, ekiris tra la ekzercoplaco.

— Ne revenos li al monaĥoj, — diris Atanazio. — Ne konformas la aspekto. Ne, ne estos li monaĥo, fuĝos... Estos kaporalo aŭ rabisto...

Adiaŭante, Atanazio diris al Rezen:

— Kaj vi, sinjoro, ne ofendiĝu. Tro multe da vi, lupoj, al ni venas. Al mi pri vi persone Silvestro Petroviĉ bone rakontis, sed mi ne kredis. Pardonu, se mi ofendis, ne deziris.

La inĝeniero ne respondis, suĉante la pipon.

Ĉe la pordego Atanazio benis Ievlev-on, diris lace:

— Malfacile por vi estos, kapitan-komodoro, plej malfacile! Adiaŭ! Eble, ni ne plu intervidiĝos.

Silvestro Petroviĉ riverencis malalte, helpis al la maljunulo malleviĝi en la velboaton. Sur remparoj, sur turoj, sur muroj de la fortreso, nudiginte la kapojn, staris artileriistoj, pafistoj, monaĥoj, masonistoj, forĝistoj, ĉarpentistoj — ĉiuj tiuj, kiuj estis defendontaj Arĥangelskon en la okazonta batalo.

Atanazio, starante en la velboato, malrapide, larĝe krucosignis ilin, diris, ne deŝirante la rigardon de la fortreso:

— Kun Dio!..

La matrosoj per hokoj depuŝis la ŝipon, la servisto surĵetis sur la ŝultrojn de la eminenco peltmanteleton, la servoknabo kovris al li la genuojn per varma tuko...

— Nun vodkon drinki kaj manĝi iomete! — diris Silvestro Petroviĉ.

— Tio estas bona! — konsentis Rezen.

Li frotpurigis la vitron de la lorno kaj rigardis ankoraŭ foje: Dvino estis malplena, nur estis pluveto, kaj malalte, super la akvo mem, estis flugantaj mevoj. Nevideblaj gvatantoj estis vokantaj unu la alian sur la remparoj kaj turoj de la fortreso.

— Kia popo! — diris kun miro Rezen, sekvante la velboaton per rigardo.

— La popo estas racia! Ni iru, Jegoro. Kaj estu trankvila. Oni nin avertos, ni ekscios de gardistoj. Ne pensu, ke neniu videblas, — sur la tuta rivero oni gardas...

Duope ili malleviĝis de gvatturo, tra la malseka malplena ekzercoplaco atingis la peronon de la domo, kie loĝis Rezen, tie ili haltis. La inĝeniero diris en la germana:

— Mi havas akvaviton — bonan vodkon. Mi konservadis ĝin por speciala okazo. Nur iomete trinkis — antaŭ longe. Kun sinjoro Krikov trinkis...

— Sinjoro Krikov, eble, nun jam eĉ dogankontrolon komencis! — prononcis Silvestro Petroviĉ. — Kaj eble, latronojn sabras. Ĉio povas esti...

Ili eniris en la ĉambron, la inĝeniero bruligis kandelon, malŝlosis kofron, elprenis la akvaviton kaj boteleton da sĥidama vodko, da ĝi restis tute malmulte, sur fundo. Soldato alportis frititan fiŝon, gamelon kun varmega kaĉo.

— Kapitano Krikov plurfoje demandadis min pri tio, kiel estas aranĝitaj eŭropaj ŝtatoj, — diris Rezen. — Li kvazaŭ ĉiam serĉas respondon al interesanta lin demando, kaj kia estas tiu demando — mi ne scias. Li multe pensas, tiu homo, kaj multe legas...

Ievlev kapjesis:

— Jes, li multe pensas, kaj al li estas malfacile vivi...

Poste, tenante travideblan bremenan glaseton antaŭ la okuloj, li demandis:

— Jegoro, respondu al mi sincere, nun respondu, antaŭ la batalo. Pro kia kaŭzo vi, fremdlandano, al ni servas? Por kio vi mortu por ni? Monon, oron vi ne tro taksas, ne kiel aliaj fremdlandanoj, tion mi multfoje rimarkis...

Rezen verŝis orkoloran akvaviton en la glasetojn.

— Vi, kapitan-komodoro, estas ruso. Vi, rusoj, ĉiam ŝatas scii: kial, pro kia kaŭzo, kion pensas homo, kiam li silentas. Ĉu tiel?

Silvestro Petroviĉ kapjesis.

— Mi al vi diros. Hodiaŭ necesas ĉion diri. La rusoj estas saĝa popolo, la rusoj estas kuraĝa popolo, la rusa homo havas jen tian koron.

La inĝeniero larĝe dismovis la manojn, por montri, kian grandegan koron havas la rusa popolo, batis la fingrojn al la

muro, ridetis. Ievlev silente aŭskultis.

— La ruso vokis nin, la ruso pensas: la fremdulo nin instruos, ni tiel ne scipovas, kiel scipovas la fremdulo, ni donos al li oron, multe da oro. Mi estas inĝeniero, mi havas dekoble pli multe, ol vi, mia estro. Jen kiel faris la ruso. Kaj kiel faris li, la fremdulo? Veneciano Georgo Lebanius, ankoraŭ kuracisto Loftus, ankoraŭ Ripley, ankoraŭ tiu, la unua, — ĉiuj ili sidas sub aresto. Jen kiel ili faras, jen kiel ili faris. Konsulo Martus, ankoraŭ la pastro, ankoraŭ la negocistoj en Arĥangelsko — kion ili faris?

Rezen ekscitiĝis, al li mankis rusaj vortoj, li ekparolis en la germana:

— Diablo prenu ilin, mi vidis sufiĉe tion, kiel kaj kion ili faras. Mi vidis ilin en Moskvo, en Kukujo, mi vidis ilin tiel, kiel vi, ruso, ilin neniam vidis kaj ne vidos. Kiu veturas ĉi tien? Friponoj, trompantoj, por cent sentaŭguloj estas unu honesta. La rusoj ne povas estimi nin, eŭropanojn. Ĉu vi memoras, kapitan-komodoro: vi venis, por lerni, kaj oni vin priŝteladis, vi venis por scienco, sed al vi oni montradis trukojn. Por kio longe paroli — ni rememoru Narvon. Ni rememoru la generalojn, kiuj serĉis reĝon Karolon, por fordoni al li sian spadon. Mi estas malriĉa inĝeniero, sed mi havas mian kapon sur la ŝultroj. Vi vokis min. Mi deziris vidi sampatrujanojn, — mi iris al Kukujo. Al mi oni kriis «vivu!» — kaj komencis instrui, kiel trompi vin. Tio estis la unua, pri kio oni min instruis. Oni ne instruis min pri rusaj vortoj — «pano», «laboro», «honoro», — oni instruis min, kiel fari nenion kaj ricevadi monon, multan monon, riĉon. Mi ne kredis al la propraj oreloj. Mi diris al ili: «Vi estas ŝtelistoj!» En la sama

nokto, vi ne scias, okazis unu duelo, poste dua. Ne, ili ne ofendiĝis, — ili ektimis, ili deziris forigi min. Kaj tiam mi venis al vi kaj dormis ĉe vi — ĉu vi ne memoras? Mi havis vundon jen ĉi tie, apud la kubuto, mi diris, ke atakis rabistoj. Mi hontis... Kaj kiam poste mi vidis, ke oni ne kredas al mi, ke oni rigardas al mi per malbonkoraj okuloj, ke en mi neniu vidas amikon, mi ne afliktiĝis, ne, kapitan-komodoro, mi pensis: tiuj rusoj estas ne tiom naivaj. Ili komprenas multon kaj ĉion memoras...

— Ni memoras! — diris Ievlev. — Kaj malbonon memoras, kaj bonon...

— Tio estas tiu vorto, kiu necesas! — ekkriis Rezen. — Memoras! Kaj mi deziras, ke vi memoru ne nur pri tiuj kvar, kiuj estas arestitaj, ne nur pri tiuj, kiuj sidas nun en la kirko sub gardo, sed ankaŭ pri inĝeniero Rezen...

Li levis la glaseton kun akvavito, tintigis ĝin, diris elkore:

— Tiun brandon donis al mi mia patrino, kiam mi veturis al vi. Ŝi diris: vi drinkos ĝin kun via amiko, kun sampatrujano, kiam renkontiĝos kun li en la fremda lando. Mi drinkas ĝin kun vi, kapitan-komodoro. Mi drinkas kun vi en la nokto antaŭ la batalo...

Li eltrinkis nemulte, skuis la boteleton kun la ŝĥidama vodko, diris malgaje:

— Kaj tiun botelon mi eltrinkis sola. Mi ŝlosadis min ĉi tie kaj drinkadis, — mi hontis...

— Manĝu la kaĉon, ĝi malvarmiĝos! — diris Ievlev. — Prenu kuleron, inĝeniero...

La kaĉon ili formanĝis silente, poste komencis paroli pri

aferoj. Ankoraŭ foje ili vizitis la turon, rigardis al Dvino, rondiris kaŝitajn sur remparoj kanonojn, dormantajn soldatojn, artileriistojn, matrosojn. Adiaŭante la inĝenieron, Ievlev diris:

— Ja vento estas de la maro, ĉu, Jegoro? Malforta, sed tamen vento! Ĉu ne ekmoviĝis la eskadro?

— Tro malforta estas la vento! — respondis la inĝeniero.

Silvestro Petroviĉ revenis en sian domon, pendigis la mantelon sur najlon, plenigis la pipon per tabako. Apude trans la muro dormis la filinoj, la filo de Rjabov Ivaĉjo, antaŭ nelonge veninta kun la patrino en la citadelon, Maria Nikitiŝna. Ievlev elbatis fajron, turniĝis al la malforte knarinta pordo. Sur la sojlo staris Taisja.

— Kial do vi ne dormas, Taisja Antipovna? — demandis Ievlev.

— Vi al mi nur unu vorton diru, solan! — rapide ekflustris Taisja. — Vi nur diru, Silvestro Petroviĉ, kio estas pri tiu Onego? Li urĝe prepariĝis, urĝe foriris. Kia Onego? Ĉu ankaŭ vi ne scias?

Ievlev ekrigardis en ŝiajn petegantajn, sopirantajn okulojn, respondis ne tuj:

— Ne scias mi, Taisja Antipovna. Iru, kara, dormu...

5. Malbonaj informoj

Nilo Longinov kaj Kopilov sidis apude, ambaŭ nerekoneble maldikiĝintaj, ambaŭ ronĝitaj de mara salo, ambaŭ kun ruĝaj okuloj. Aliajn fiŝistojn, kiuj batalis en la insulo kontraŭ svedoj, Atanazio Petroviĉ jam pridemandis, skribis foliojn, liberigis; ili sidis apud la domo sub vento, parolis kun dogansoldatoj.

— Ĉu vi mem per viaj propraj okuloj lin vidis? — demandis Krikov Longinov-on.

La fiŝisto kolere movis la nazon, ne respondis.

— Ĉu vidis aŭ ne vidis? — ankoraŭ foje severe demandis la kapitano.

— Tra fendo ne eblas multon vidi, — respondis Longinov. — Vi mem, Atanazio Petroviĉ, sur diversaj ŝipoj estadis, vi scias, kia en holdoj estas vido. Kaj la voĉo — ĝuste, lia voĉo estis, kaj konversaciis ni ne tro mallonge. Sed mi ne kredus, — al mi pri tiu afero ilia homo diris, kiu segilon alportis. Parolis, ke kvazaŭ ĉe la admiralo Rjabov estas — ĉu kiel servanto. Kaftanon al la hundo oni donacis brokaĵan, ĉenojn demetis, regalon alportis. Sidis kvazaŭ nia Ivano Sabateiĉ, drinkis, monon al li trezoristo alportis — sakon.

Krikov aŭskultis silente, sidis morna kiel nubo, movadis la brovojn. Tabako en la pipo estingiĝis, li skrapis per najleto, komencis elbati fajron. Longinov subite kriis:

— La avon pendumis la monstroj, sed li, kanajlego, al ili pro ilia mono transiris. Nu, trafos li al mi — per la manoj mi lin ŝiros, latronon, li eĉ brigadestro nia estis, rememoros li...

— Ne kriu! — ordonis Atanazio Petroviĉ. — Kial vi krias?

Kopilov diris kun ĉagreno:

— Ĉi tie, Atanazio Petroviĉ, eblas krii! Eĉ ne tiel krii! Se vi vidus, kiel ili nin pendumi intencis, vidus, kiel ni kontraŭ ili batalis sur la insulo. Ili ne estas homoj — bestoj, kaj kie oni tiajn trovis...

— Kiu estas la homo, kiu donis al vi la segilon? —

demandis Krikov.

— Kiu lin scias. Kvazaŭ nia, rusa, sed parolas en nia lingvo mallerte. Ne ĉio kompreneblas, kion li diras. Viro ne maljuna, aĝa eble dudek kvin — ne pli...

Atanazio Petroviĉ eksnufis per la pipo, kuntiris la brovojn, prenis plumon — skribi por la fiŝistoj paspermeson, por ke ili iru en la urbon, al la hejmoj. En la skansoj oni sonorigis la batilon: doganistoj — vespermanĝu. Soldato alportis en bovlo brasiksupon — provaĵon por la kapitano. Krikov prenis de breto lignan, eltranĉitan de Prokopjev kuleron, glutis, ordonis manĝigi ankaŭ la fiŝistojn.

Kiam Longinov kaj Kopilov foriris, Atanazio Petroviĉ eksidis al la tablo, kunpremis la kapon per la manoj, oĥis, insultis. Ĉu vere Ivaĉjo Rjabov, tiu Rjabov, al kiu li fordonis la plej karan, kio estis en lia vivo, tiu Rjabov mem, kiun li iam, en antaŭ longe pasintaj jaroj, liberigis de la malica negocisto Urquhart, tiu Ivano Rjabov, kun kiu li iris al Ievlev kaj Apraksin sur la Mosean insulon, — ĉu vere li povis transiri al la svedoj, servi al ili pro oro, pro brokaĵa kaftano, ĉu vere li povus konsenti kaŝe trairigi la eskadron laŭ la Dvina ŝanelo al la urbo? Sed ne, ne povis tiel esti, ne povis tiel okazi, ne vidis tion Longinov, li mem ja diris — Rjabov bruis per ĉenoj.

«Nu, kaj se?»

Kaj li subite kvietiĝis, kiel homo, farinta firman decidon: «Tiam mi lin mortigos. Trovos kaj mortigos! Pri kio do mediti?»

Sed tuj li ekhontis pro tiu penso: ĉu la rudristo kondukos svedajn latronajn ŝipojn? Li subridis, penseme balancis la

kapon: kion ajn babilas homoj, kion ajn elpensas...

Ankoraŭ foje bruliginte la pipon, li eliris eksteren, ekpaŝis al la gvatturo. Dum la vojo al li renkontiĝis Eŭdokimo Prokopjev, — li estis kuranta kun malbona informo: estiĝis vento, la svedoj levas la ankrojn.

— La vento ja estas bagatela! — plirapidigante siajn paŝojn, diris Atanazio Petroviĉ. — Kia estas tiu vento?

Post Krikov kure leviĝis supren Meĥonoŝin, prenis el la manoj de la kapitano la lornon, apogis la stangon al la planko de la gvatturo, komencis direkti tien, kien rigardis Atanazio Petroviĉ: duboj ne plu estis — la eskadro sub veloj estis iranta al la Dvina buŝo.

— Ili iras! — diris la leŭtenanto per raŭkiĝinta voĉo. Li tuspurigis la gorĝon kaj ripetis. — Je Dio, ili iras! Kaj kiom!

— Ne tiom multe! — subridis Krikov. — Eskadro ja...

Meĥonoŝin frotpurigis la okularion, ankoraŭ fiksrigardis: la ŝipoj estis irantaj, kvazaŭ grandegaj rabobirdoj, kaj la leŭtenanto eĉ ektimis ĉe penso, ke tiun minacan eskadron haltigos Krikov, aŭ kapitan-komodoro Ievlev, aŭ li, Meĥonoŝin.

— Ili iras! — balbutis li. — Ĉi tien iras. Al ni.

Atanazio Petroviĉ movis la trikornan ĉapelon sur la nukon, turnis la lornon al si.

— Vidu, kiom! — flustris al li Meĥonoŝin kaj eĉ puŝis lin al la flanko. — Kia forto, ĉu? Kaj sur ĉiu estas kanonoj, kaj po kiom da kanonoj...

Krikov ne respondadis, plu rigardis.

Malsupre, sur la purigita nun ekzercoplaco, estis viciĝantaj la doganistoj. Tamburo batis kunvenon, kaporaloj nomvokadis soldatojn, kanonistoj sub ŝedo, kie staris nova doganeja kanono, estis blovekscitantaj braĝon en poto, por bruligi la meĉon sen prokrasto, kiam necesos. En egalmezura susurado de pluvo aŭdeblis, kiel henas kaj mordas dragonaj ĉevaloj ĉe la ĉeval-alligejo...

— Nun — al Dio preĝi, alion ne eblas fari! — diris Meĥonoŝin per obtuza voĉo.

— Aŭ eĉ vodkon drinki! — retenante koleron, respondis Atanazio Petroviĉ kaj kriis malsupren: — Kaporalo, ŝargojn havu ne malpli ol dek du!

— Kio? — demandis demalsupre Eŭdokimo Prokopjev.

— Kuŝigi lin kaj fari cent batojn — tuj la orelojn purigos! — konsilis Meĥonoŝin.

Krikov kliniĝis de la turo, ripetis pri la ŝargoj. Eŭdokimo ekiris en la tenejon. Meĥonoŝin ekparolis per paciga tono:

— Jen vi ĉiam, Atanazio Petroviĉ, montras al mi vian malsimpation, sed mi ja pravas. Fiŝistoj diras: per propraj okuloj ili vidis en la eskadro piloton-perfidulon, pri tiu malĝoja evento ĉiu soldato en la skansoj scias. Kaj nomo de tiu piloto estas Rjabov. Mi preskaŭ arestis lin pro ŝtelo, sed via kapitan-komodoro min elpelis, per insultaj vortoj min skoldinte. Nun solvu...

Krikov strabis al Meĥonoŝin, ree komencis frotpurigi la okularion de la lorno.

— Jen, eskadro, kaj ankoraŭ perfido... — daŭrigis la leŭtenanto. — Kaj ni ĉi tie niajn vivojn perdu, pro kio? Ĉe

Narvo ĉi glora armeo frakasis plene la caron mem, kaj nun ili kontraŭ ni iras militi, do ni estas pretaj — doganistoj kaj dragonoj...

Atanazio Petroviĉ abrupte turniĝis al Meĥonoŝin, diris kun furiozo:

— Iru for de ĉi tie, leŭtenanto, faru favoron pro Dio, alie mi vin mallevos per genubato al via pugo, vi frakasiĝos — estas alte flugi ĉi tie.

La leŭtenanto deiris je paŝo, demandis, levinte la brovojn:

— Ĉu vi bonvolas alparoli min?

Krikov, ne respondante, tegis la lornon, malleviĝis suben, en la domon — ŝanĝi la veston. Ne hastante, li trankvile elprenis el kofreto puran subveston, novajn ŝuojn, ŝtrumpojn, bondrapan uniforman kaftanon. Transvestinte sin, li ŝargis du pistolojn, unu metis en la brustan poŝon, la alian en la ledan sakon dekstre. En la ĉambron, ne frapante, eniris la malnova kaj fidela amiko kaporalo Eŭdokimo Aksenoviĉ, alportis akrigoŝtonon — por akrigi la pinton de la spado, eksidis, kiel sidadis, elfarante lignajn kulerojn aŭ la solviĉegodan ĉeneton, — trankvile, firme, en la maldekstra mano tenante la akrigoŝtonon, en la dekstra la spadon. Li mallaŭte ekkantis:

Ne kaptis mi
Freŝan fiŝon tremantan...

Atanazio Petroviĉ fiksrigardis la vizaĝon de Prokopjev, prilumitan de fajro de kandelo, miris, kiel povas la homo kanti nun, kaj tuj komprenis: la kaporalo kantas, kiel spiras, kaj pensas pri alio. Lia vizaĝo estis severa, la pensoj flugis malproksime, kaj kie — kiu scias?

— Pri kio vi pensas, kaporalo? — nelaŭte demandis Krikov.

Prokopjev levis la kapon:

— Pri kio, Atanazio Petroviĉ? Ja pri multaj aferoj! Pri gajaj aferoj nun penso ne iras...

— Pri kio do malgaja?

— Jen antaŭ nelonge diris fiŝistoj pri Rjabov...

— Galimatio ĉio estas! Mensogo!

— Kaj ankaŭ mi tiel rezonas — mensogo. Nu, kaj se ne?..

Li skuis la kapon, ree kliniĝis super la akrigoŝtono, kaj ree en la ĉambro aŭdiĝis karakteriza seka krakado de ŝtalo je la ŝtono. Krikov bukis la zonon per ambaŭ bukoj, ŝovis malantaŭen faldojn de la kaftano, reĝustigis la portopeon, enpensiĝis, kion ankoraŭ necesas fari.

— Nun taŭgas! — ridetante per la granda buŝo, diris Prokopjev kaj donis al li la spadon. — Nun estos bone...

— Kaj ĉu la via estas akrigita?

— Ĉe ni ĉio estas en ordo! — respondis la kaporalo. — Bone ni prezentiĝos al la svedo, ne ridos li pri ni.

Al la pordo oni skrapis, la kaporalo malfermis.

— Nu, kio, Sergunkov?

— La kanonon mi alportis! — diris la soldato. — Sinjoro kapitano antaŭ nelonge diris — afuston por ĝi eltranĉi. Jen mi eltranĉis.

— Ha, la kanono! — subridis Prokopjev.

— Ja vi eniru, — vokis Krikov, — eniru, Sergunkov!

Sergunkov eniris, metis sur la tablon la afuston por la ludila kanono. Atanazio Petroviĉ elprenis el la kofreto la kupran kanontubon, viŝis ĝin per frotilo, surprovis al la afusto. La kanontubo konformis. Sergunkov ridetante rigardis, kiel aspektis nun la kanoneto — kvazaŭ reala.

— La tubo en ĝi estas malgranda! — diris, mallarĝigante la okulojn, Prokopjev. — Mallonga. Jen kiam ni finos la aferojn, ni pensos, kiel plilongigi...

— Mi malĝuste kalkulis! — kulpe prononcis Krikov.

Li surĵetis la mantelon sur la larĝajn ŝultrojn kaj ordonis al la kaporalo vicigi la doganistojn. Prokopjev reĝustigis la trikornan ĉapelon, korektis la portopeon, eliris. Atanazio Petroviĉ ankoraŭ prokrastis iom, kvazaŭ ion rememorante, eksidis al la tablo, trempis la plumon en diluita de la skribisto fulgo, skribis grande, per kurbaj literoj:

«Taisja Antipovna, didonita mia fratino, saluton, skribas mi al vi en ĉi minutoj, kiam mi atendas grandan alarmon...»

La skribita linio ne plaĉis al li, ne plaĉis ankaŭ tio, ke li nomis Taisja-n didonita fratino.

— Jen, Evaj idinoj! — suspiris Atanazio Petroviĉ, ŝiris la paperon je pecoj kaj eliris el la ĉambro.

6. De la plej grava servo — gardistoj

Pluvego ĉesis, restis nur pluveto. Vento ne estis tute. La doganistoj, viciĝinte en krepusko, estis nelaŭte interparolantaj. Sur Dvino knaradis la doganaj boatoj.

— Ili ĵetas ankrojn! — kriis de sur la gvatturo Prokopjev. — Ĉu vi aŭdas, sinjoro kapitano?

Krikov facile enkuris supren, rigardis: la eskadro, nigra fone de la ĉielo, estis balanciĝanta iomete pli alte de la loko, destinita por dogankontrolo. Sur mastoj kaj jardoj iris laboro: tie moviĝadis nigraj figuretoj de matrosoj — ili forigadis la velojn.

— Malfortunis al ili! — diris Prokopjev. — Ne divenis kun vento. Do, ĉu ili mem petos kontrolon, aŭ ni pafos?

Atanazio Petroviĉ silentis.

— Grandegaj ŝipoj ja! — ree diris Prokopjev. — Eble, ne venadis al ni ĝis nun tiaj grandegaĵoj, ĉu? Ĉu militaj estas la ŝipoj?

— Militaj, kaporalo.

— Ankaŭ mi pensas — militaj.

— Latronoj.

— Ĝuste, latronoj...

En tiu momento en la pruferdeko de la flagŝipo brilis fajreto. Kaj tuj super Dvino ruliĝis sono de muskeda pafo, kaj post ĝi ekflugis raketo.

— Nu, kion diri! — mire prononcis Prokopjev. — Ili mem kontrolon petas. Eble, ili eĉ ne estas latronoj?

— Latronoj, kaporalo! — certe respondis Krikov. — Latronoj, kaj ni devas esti al tio pretaj. Latronoj, kaj krome ruzaj. Nu, ankaŭ ni ne estas simpluloj, vidis multe da tiaj. Ni iru!

Malsupre li diris al Meĥonoŝin mallonge kaj seke:

— Se vi aŭdos, leŭtenanto, de la eskadro pafadon, iru kun la

dragonoj por helpo...

Meĥonoŝin silentis.

Tiam Krikov forturniĝis kaj, trovinte per rigardo altan maljunan dragonon Drozdov-on, diris al li:

— Ĉu vi aŭdas, Drozdov, mi pri vi esperas!

Drozdov respondis tuj:

— Esperu, Atanazio Petroviĉ. Ni faros kiel necesas!

Krikov saltis en la velboaton, la soldatoj depuŝiĝis per hokoj, la kapitano ordonis:

— Remilojn sur akvon!

Li mem prenis la rudrostangon, la remiloj leviĝis akorde. La malsekan doganan vimplon la kaporalo glatigis per la manoj, la flago ekplaŭdis malantaŭ la pobo. La velboato rapide, kvazaŭ per tranĉilo, tratranĉis la kvietan, malklaran post pluvego akvon. La soldatoj remis silente, forte, egalmezure, kun mallongaj paŭzoj inter rembatoj, dum kiuj ĉiuj remistoj samtempe kliniĝadis antaŭen, svingante la remilojn. La vizaĝoj de la doganistoj estis severaj, ĉiuj sciis, kio ilin atendas.

— Hej, kanton! — ordonis Krikov.

Prokopjev mirege ekrigardis al li, eĉ la buŝon malfermis pro miro, la kapitano ripetis:

— Kanton, kaj bravan. Ili aŭdu, kia popolo estas sur la velboatoj. Komencu, kaporalo!

Eŭdokimo faris suferplenan vizaĝon, ekkantis per alta voĉo:

Strato, mia strato, larĝa mia strat',
Herbo, mia herbo, verda mia herb'!

La remistoj kunkantis kun paŭzeto, kvazaŭ en danco, prepariĝante al artifiko:

Do la straton ne plu iros mi,
Do la herbon ne plu tretos mi...

Sur la dua dogana velboato oni kunkantis kun minaco, pli base, malalte:

Do la herbon ne plu tretos mi...
Karulinon ne plu vidos mi...

Kaj sur la jam malproksima bordo, en krepusko, sub pluveto, kun ululo, kun fajfo, kvazaŭ helpante al la doganistoj, laŭte ekkantis la dragonoj:

Karulinon ne plu vidos mi...
Sidas iam karulino sola,
Sub fenestro sidas, al li diras:
Knabo, knab' vi juna mia,
Brava kapo via bukla,
Brava kap' via kuraĝa...

— Fino! — komandis Krikov.

La remiloj leviĝis supren. La velboato en nebulo, sub susuranta pluveto, estis aliranta al la grandega nigra silenta maso de la flagŝipo. Pacaj, skulptitaj el ligno folioj, vinbergrapoloj kaj gajaj homaj vizaĝoj girlande vidiĝis tie, kie milita ŝipo devus havi kanontruojn. Kaj paca, afabla voĉo demandis el la ŝipo ne en la rusa:

— *Wer da?*[114]

— De rusia dogana gardistaro kapitano Krikov kun soldatoj

114 Kiu iras? *(germ.)*

sub la ŝtata standardo! — laŭte respondis Atanazio Petroviĉ. — Mallevu la paradan ŝtuparon!

La velboato obtuze batiĝis je la flanko de la ŝipo. Supre ekŝrikis pulioj, aŭdiĝis abruptaj vortoj de komandoj. Super la velboato malrapide eknaĝis la parada ŝtuparo. Kaj de la malproksima, nun nevidebla bordo plu aŭdiĝis la brava gaja kanto:

Strato, mia strato, larĝa mia strat',
Herbo, mia herbo, verda mia herb'!

Ĉapitro sesa

Kiu al standardo ĵuris foje, ĉe ĝi ankaŭ ĝis la morto stari devas.

Petro I

1. Dogankontrolo

— Vi aĉetos ilin per mono! — prononcis Gyllenstierna.

— Tio ne estas ebla! — respondis Urquhart.

— Vi ilin aĉetos! — ripetis la subadmiralo. — Ja ili havas kapojn sur la ŝultroj. Ili, sendube, divenas, ke la ŝipo estas milita. Ili ne deziros morti. Ili ricevos sian monon kaj foriros, preĝante Dion pri ni.

— Mi konas ilian estron! — ekkriis Urquhart. — Kredu min, *herre* subadmiralo, — lin aĉeti ne eblas.

— Tio dependas de prezo! Kontraŭ bagatela prezo li ne deziros vendi sian honoron, sed kontraŭ granda mono... Diablo prenu, ni bezonas, ke ĉi tie ĉio okazu mallaŭte. Ĉu ni bezonas pafadon kaj bruon en la skansoj? Se la doganistoj estos subaĉetitaj, ĉio pasos kviete, kaj en la fortreso oni povos kredi, ke ni vere estas negocistoj...

Urquhart silentis, mallevinte la kapon: kion li povis fari kun tiu frenezulo? Silentis ankaŭ subkolonelo James. Sed kia povus esti eliro, se vento mankas kaj la eskadro, kvazaŭ pro fatalo, haltis nemalproksime de la skansoj? Ĉu tuj komenci pafadon? Tio estas neracia. Ĉu atendi, ĝis la doganistoj per kanona pafo postulos, ke la ŝipoj voku dogankontrolistojn? Ne, la plej saĝa

tamen estas — agi tiel, kiel konsilas la subadmiralo.

— Kaj la piloto? Kion ni faros nun kun la piloto? — demandis Urquhart.

Gyllenstierna levis la ŝultrojn: la piloton necesis ree kaŝi en la ĉenkeston. Por ke li ne bruu, sur lin eblas surmeti ĉenojn.

— Tio kolerigos lin! — diris Urquhart.

— Ne gravas! Tamen ili ne renkontiĝos. Ili ne devas renkontiĝi. Nenio bona el tio rezultos.

— Por ni estos malfacile!.. — rimarkis Urquhart.

— Se estos malfacile, ni batalos nur per blankaj armiloj. La kolonelo avertos pri tio la soldatojn. Ne tiom granda estas laboro — mortigi per tranĉiloj dekon aŭ dudekon da doganistoj.

Urquhart suspiris.

Post kelkaj minutoj al Rjabov oni per ŝnuro ligis la manojn, poste surmetis trioblan ĉenon. Li elŝiriĝis — tiam oni ŝtopis lian buŝon per ĉifono kaj ektrenis laŭ la ŝtuparo malsupren. Demĉjon oni same ligis.

Tablo kun regaloj estis primetita en la salono, samtie estis preparita mono en bela brodita monujo, en skatolo kuŝis ŝipaj dokumentoj, lerte faritaj en Stokholmo en la monfarejo. La doganistojn devis akcepti Urquhart kun tuta afableco, Golgolsen, kiel malnova kaj konata en la rusaj akvoj eskortulo, estis destinita helpi lin. Matrosojn por la renkonto Gyllenstierna ordonis elekti plej imponajn. Por ke la ŝipo havu eĉ pli pacan aspekton, kolonelo James konsilis al Urquhart ne eliri al la parada ŝtuparo, kvazaŭ la ŝipestro dum la vojaĝo

ekmalsanis kaj sentas sin tiom malforta, ke duonkuŝas, kovrita per plumono...

Urquhart subridis kaj rememorigis al James, ke ili ambaŭ sufiĉe bone konas la doganan oficiron Krikov-on: ne eblas esperi pri sensanga fino de la dogankontrolo.

— Kion do ni faru? — demandis James.

— Ni faru tion, kion ordonis la subadmiralo! — respondis Urquhart kolere. — Ni ĉiuj estas en lia potenco. Se li opinias, ke estas nenio pli simpla, ol trompi la rusojn, do tiel devas esti...

Urquhart kuŝiĝis sur sofon, ordonis alporti al si plumonon kaj varman koltukon, por meti kompreson sur sian gorĝon. Li vere eksentis febrotremon.

Apude — en la malhela koridoro, en du oficiraj kajutoj, sur la ŝtuparo, kondukanta al la ŝipkuirejo, — lokiĝis buĉistoj de del Robles kun tranĉiloj kaj ponardoj, pretaj laŭ ordono de la hispano komenci batalon. Gyllenstierna iradis en sia kajuto supre, en la salono aŭdeblis liaj firmaj rezolutaj paŝoj.

Kolonelo James, balbutante pro timo, demandis:

— Kaj poste?.. Kio estos... post la dogankontrolo?..

— Tion ankoraŭ necesas ĝisvivi! — respondis Urquhart. — Iru, *herre* kolonelo, iru... Sinjoroj doganistoj ne atendos...

Ĉe la parada ŝtuparo kapitanon Krikov-on renkontis la navigisto de «Krono» kaj, ĝentile pardonpetinte, invitis veni en la salonon, kie, laŭ liaj vortoj, estis kuŝanta la ŝipestro, malvarmuminta en la maro dum ŝtormo.

Krikov kapjesis kaj, per la mano en ganto retenante la

spadon ĉe la kokso, kun duono de siaj soldatoj kaj kun la kaporalo (al la ceteraj soldatoj li ordonis resti sur la dekstra flanko de la pobkastelo) ekiris al la ŝtuparo, kondukanta en la salonon. Antaŭ li standardisto Jermiĥin portis la rusan flagon, malantaŭe du tamburistoj estis batantaj etan tamburadon.

En la salono Krikov haltis antaŭ la primetita tablo kaj, kvazaŭ rekoninte nek Urquhart-on, nek Golgolsen-on, per akra ordona voĉo diris:

— De dogana gardistaro de lia cara moŝto kapitano Krikov kun soldatoj por plenumado de leĝa dogankontrolo kaj pridemando venis. Antaŭ la flago de la rusia ŝtato unuavice mi petas ekstari...

La tamburistoj mallonge batis signalon, Urquhart leviĝis de la sofo, alpremante la plumonon al la dika ventro, ridetante per la grasa vizaĝo, respondis:

— Ni estas malnovaj konatoj, kapitano...

Golgolsen same ekstaris. Krikov eltiris el la manikroverso paperon, metis ĝin sur la dorson de tamburisto, la alia tamburisto donis flakonon kun inko el fulgo, plumon. Atanazio Petroviĉ demandis:

— Nomo de ĉi ŝipo?

— Ĉi ŝipo havas nomon «Astrea», — mensogis Urquhart.

Krikov skribis per grandaj literoj: «Astrea».

— Kiom da toneloj?

Urquhart respondis. Atanazio Petroviĉ severe diris:

— Mi, sinjoro ŝipestro, ne la unuan jaron gvidas kontroladon de ŝipoj, kion vi scias per via sperto. Kaj mensogi

por vi ne konvenas. Bonvolu diri la veron.

La ŝipestro levis la ŝultrojn, aldonis ankoraŭ centon. La kapitano rigardis al li sen palpebrumi, trankvile. Urquhart tremis sub tiu rigardo. Kiel ŝanĝiĝis dum la pasinta tempo la iam juna doganisto! Kiel maturiĝis tiu simpla vizaĝo de kampulo, kian trankvilon, kian certecon spiras la tuta aspekto de tiu oficiro. Kaj kiel li belas en sia uniformo kun verdaj roversoj sur la kolumo, kun blanka tuko sur la kolo, en gantoj, strikte kovrantaj la manojn, kun la spado, rekte kaj lerte kuŝanta ĉe la kokso...

— Mi petas respondi al la punktoj de la demandaro! — diris Krikov.

Urquhart klinis la kapon.

— De kiu ŝtato estas viaj ŝipoj? — demandadis Krikov per malvarma ofica voĉo. — Ĉu ne estis vi en epidemiaj, alivorte malsanaj, lokoj, ĉu ne havas sur la ŝipoj kanonojn pli ol estas permesite por defendo kontraŭ mara pirato, ĉu ne estas vi en alianco kaj amikeco kun reĝo Karolo, ĉu ne venis laŭ lia ordono, ĉu ne estas vi kaŝitaj svedaj militistoj?

— Ne! — firme respondis Urquhart.

La kajutvaĉanto donis al li Biblion. Li metis sur ĝin la maldekstran manon, la dekstran levis supren, ekparolis:

— Per Dio ĉiopova kaj per la sankta Biblio mi ĵuras, ke la ŝipoj de mia trajno estas ŝipoj negocistaj, en epidemiaj, alivorte malsanaj lokoj ne estis, sur la ŝipoj kanonojn pli, ol necesas por defendo kontraŭ mara pirato, mi ne havas...

Krikov aŭskultis senmove, rigardis en la satan roz-blankan vizaĝon de Urquhart, pensis: «Kie do estas Dio? Kial li ne

krevigas la ĵurrompanton sur la loko? Kie estas la fulmo, kiu devus fali sur lian kapon?»

La ŝipestro almetis la lipojn al la Biblio, Krikov postulis ŝipajn dokumentojn. Golgolsen, interkruriginte seĝon, apoginte la vunditan mentonon sur la krucitaj polmoj, aŭskultis, kiel paŝas en sia kajuto la subadmiralo — atendas. Kion? Tutegale tio ne finiĝos pace. Kaj, mallarĝigante unu okulon, Golgolsen mezuris, kien piki per spado la impertinentan rusan oficiron.

— Ĉu tason da turka kafo pro humida vetero? — proponis Urquhart, kiam la kapitano redonis al li la dokumentojn.

— Mankas tempo! — respondis Krikov.

— Ĉu vi rigardos niajn varojn? — demandis Urquhart.

— Rigardos.

— Granda laboro! — diris la ŝipestro. — Ĝi minacas al ni per monperdo. La foiro baldaŭ finiĝos, ni bezonas ĉiun tagon...

— En ĉi jaro ne estas foiro! — respondis la kapitano, rekte rigardante en la okulojn de la ŝipestro. — Pri tio estis senditaj leteroj al multaj landoj...

Urquhart palpebrumis. En la salono estiĝis plena silento, nur Golgolsen snufis, kaj krakadis kandeloj en kupraj kandelingoj. Urquhart ne sciis, kion respondi.

— Ĉu foiro ne estas pro danĝero de la svedo? — demandis li finfine.

Atanazio Petroviĉ kapjesis.

— Eĉ pli malbone por ni! — diris Urquhart. — Kiaj malprofitoj! Ni alveturigis multajn bonegajn varojn, kaj nun ni devas stari ĉi tie dum kelkaj tagoj. La matrosoj ricevas laŭtagan

pagon, la eskortaj soldatoj same, — el kio mi pagos al ili? Foiro ne estas, aj-aj-aj. Eble, ni povus vendi niajn varojn pogrande, sed nur pli rapide...

— Jes, malprofitoj estas grandaj! — konsentis Krikov. — Ĉe vi ankoraŭ unu ŝipo dronis apud Sosnovco, kaj alia — dum la ŝtormo...

Urquhart miregis, eksvingis la manojn:

— Ĉe ni? Vi eraras, kapitano! Ĉe ni ĉio, dankon al Dio, estas en ordo!

— Do, ne ĉe vi. Tio estis alia eskadro. Tieaj latronoj per forto kaptadis niajn fiŝistojn kaj pendumadis ilin sur jardo. Eĉ pli: ili katenis nian rudriston Rjabov-on kaj kaŝis sur unu el siaj ŝipoj. Tiu rudristo al vi, ŝipestro, estas konata, en la antaŭaj tempoj estis okazo, ke troviĝis li sur via ŝipo «Ora nubo»...

Urquhart ree ne trovis, kion diri.

— Vi havas bonan memoron! — diris li finfine.

— Kion necesas — mi memoras! — morne prononcis Krikov.

Li turniĝis al sia kaporalo, ordonis trankvile:

— Komencu dogankontrolon. Rigardu varojn kun tuta diligenteco. Sekvu min!

Urquhart etendis antaŭen la pufajn manojn, ekkriis:

— Kapitano! Ĉu indas malŝpari fortojn? Tio daŭros senfine. Jen monujo. Ĉi tie estas monsumo pli granda, ol tiu, kiu povus esti deklarita ĉe konfuzo pro varoj, ne indikitaj en la listo. Kapitano...

Atanazio Petroviĉ rigardis al la monujo, al la ŝipestro, al la eskortulo, leviĝanta de la seĝo, turniĝis kaj ekiris al la pordo. La buĉistoj de del Robles — en la koridoro, en la malhela kuireja ŝtuparo, en la navigista kajuto — retenis spiradon. Preter ili kun tamburado, per firmaj paŝoj estis leviĝantaj sur la pobferdekon la rusaj doganistoj.

— Jen lumas! — kapmontris Prokopjev al duonmalfermita pordo en la admiralan kajuton. — Vidu, kie estas ilia ĉefo... Jen li — maljunuleto tia, flava...

Krikov malrapidigis la paŝojn kaj tuj ekvidis la maljunuleton kun flava vizaĝo kaj brosaj brovoj, kiu estis senmove staranta kaj aŭskultanta, fleksinte per la seka polmo la grandan malmolan orelon.

— Ĝuste li estas, monstro! — flustre diris Prokopjev. — Vidu, aŭskultas...

Kaj Krikov, ne respondinte, konsentis, ke ĝuste tiu estas la monstro, kaj pensis, ke kiam ĉio komenciĝos, li venos kaj mortigos tiun maljunuleton.

La salono malpleniĝis.

— Nu? — demandis Golgolsen.

— Kio — nu? — respondis Urquhart. — Ili ĉion komprenas kaj iras al morto. Ili ne deziras batali ĉi tie, ili preferas batalon sur la pobkastelo, tie ilin oni vidos de la bordo... Prenu vian spadon kaj iru tien, se vi ne kredas mian vorton.

Golgolsen reĝustigis la kirason, per la manrando vigligis la pikantajn lipharojn, fajfis per la fingroj. Del Robles ŝovis la malhelan maldikan vizaĝon en la rondan fenestreton super la tablo.

— Sur la pobkastelon! — diris la eskortulo. — Tranĉilojn en la manojn! Kiom da ili estas entute?

— Ses dekoj! — respondis del Robles. — Ni ĉifos ilin en unu momento!

Golgolsen elprenis pistolon el la poŝo, alŝutis pulvon en la pulvujon, ekiris al la ŝtuparo.

— Pafi estas malpermesite! — flustre rememorigis la ŝipestro.

— Mi estas maljuna por sabri, — respondis la eskortulo. — Kaj tio ne estas tiom simpla...

Li leviĝis sur la pobferdekon. El lukoj, en griza malklaraĵo de pluveto, el ĉie aperadis homoj de del Robles. Kliniĝinte, ili iris laŭlonge de la ŝiprandoj, unu post alia, fortaj, lertaj, en bonaj kirasoj el elasta ŝtalo, kun longaj akraj tranĉiloj en la manikoj.

Golgolsen malleviĝis sur la pobkastelon, svingante la kapon, diris al Krikov en la rusa:

— Pfa, kiel tre malvarma veter'! Pfa! Malseka veter'!

Krikov ne respondis, staris senmove, kunmetinte la manojn sur la brusto sub la mantelo. Liaj kaporalo kaj soldatoj estis lerte movantaj pakojn. Nun Atanazio Petroviĉ neniom dubis pri tio, ke la ŝipo estas milita kaj konstruita tute ne por amika komerco, sed por bataloj. Sed certeco estis ankoraŭ ne sufiĉa, necesis konvikti la latronojn, kaj kiam li konviktos — estos batalo, pace la svedoj, certe, ne ellasos la doganistojn el la ŝipo. Kaj Atanazio Petroviĉ estis prepariĝanta al tio, kio nepre devis okazi, — al la batalo, kaj pririgardadis la pobkastelon, mezferdekon, pruferdekon ne kiel ŝipon, sed kiel batalkampon,

penante antaŭdiveni iron de eventoj...

Golgolsen staris apude, kuntirinte la brovojn, — li same atendis, sendeŝire rigardis al la grizaj en krepusko grandegaj kofroj, en kiuj James kaŝis siajn soldatojn. La doganistoj, po ses en vico, estis alirantaj ĉiam pli proksime al la kofroj, defaligante dum la irado pakojn kaj per ŝargostangoj trapikante la molan varon. Pakoj estis multaj, la doganistoj ŝvitis...

— Por kia neceso sur la pobkastelo estas lokitaj ĉi kofroj? — demandis Krikov.

La eskortulo ŝajnigis, ke ne komprenis la demandon kaj preskaŭ en la sama momento la septo de la kofro sensone foriris flanken, en foldojn, ŝipatakaj soldatoj kun hakiloj paŝis al la doganistoj, tiuj kaptis siajn spadojn. Golgolsen deiris je paŝo de Krikov, ĵetis antaŭen la manon kun la pistolo, sed pafi ne sukcesis, — flava flamo bruligis lian vizaĝon, kaj li falis flanken, stertorante, kun kuglo en la brusto...

2. Meĥonoŝin forleporis

Sur la ŝipo ekkrakis pafoj.

Leŭtenanto Meĥonoŝin tuj ŝvitis, ojis, kuris trans la gardistejon — seli ĉevalon. Liaj manoj ne obeis, li sufokiĝis, ne povis ĝuste streĉi la selrimenon. La pafoj iĝadis pli kaj pli oftaj, de Dvino aŭdiĝis longa krio. Meĥonoŝin, kliniĝante, tiris la ĉevalon sur la vojon kaj nur ĉi tie eksidis en la selon. Ĉi tie al li iĝis pli trankvile, li krucosignis sin kaj, flustrinte: «Spit', ne mortos mi por vi, friponoj», — spronis la ĉevalon kaj ekrajdis al Arĥangelsko.

En la urbo la leŭtenanto sen peno trovis la oblikviĝintan,

kovritan de musko domon de rudristo Longinov kaj eniris kun tiu ordona aspekto, kiun ĉiam timis submetitaj al li homoj. Tamen Nilo, ankoraŭ ne ripozinta post la vojo, estis manĝanta brasiksupon kaj la leŭtenanton ne ektimis, kaj helblonda knabeto eĉ tuŝis la spadon de Meĥonoŝin. Knabineto kaŝiĝis en angulo.

— Saluton! — diris Meĥonoŝin.

— Nu, saluton! — respondis Longinov, ĉirkaŭlekante la kuleron.

— Ĉu vi estas rudristo Longinov?

— Ja kiu alia? Certe, Nilo Longinov.

— Prepariĝu, vin la princo-vojevodo postulas.

— Por kio prepariĝi? Mi ĵus eniris — prepariĝu! Lasu min almenaŭ nokton dormi.

— Ne eblas! — firme diris Meĥonoŝin. — Urĝe estas ordonite.

— Sed por kio mi al li necesas? — koleriĝis la rudristo. — Ŝajne ni ne estas baptanoj.

— Tie vi ekscios...

Nilo suspiris:

— Kien do veturi? La arestejo ŝajne estas ŝlosita, — soldatoj en la skansoj diris. Ĉu en la bojaran domon mem?

Bruis la pordo, eniris Eŭtinjo kun ligna laktositelo — ŝi melkis la bovinon.

— Jen oficiro venis, — per kulpa voĉo diris Longinov. — Al la vojevodo postulas...

Eŭtimia metis la laktositelon, puŝis per la piedo ronronantan katon, por ke tiu ne ŝoviĝu al la lakto, ekrigardis al Meĥonoŝin:

— Sed li ja ĵus el la maro revenis, kion li suferis, ho Dio! La svedoj lin preskaŭ mortekzekutis, pendumi intencis.

Al Meĥonoŝin tedis, li stamfis, kriegis, ke batos per bastonoj. Nilo leviĝis, la infanoj malgaje ekploris.

— Ĉu vi havas ĉevalon? — demandis la leŭtenanto.

— Ne ĉevalon — fulmon! — subridante, fanfaronis Longinov.

Li elkondukis el ŝedo maljunan, laman je ĉiuj kvar piedoj eksstalonon, grimpis sur ĝin, diris petole:

— Ni vetrajdu, kiu kiun devancos! Jen, kian ĉevalon mi havas!

Eŭtinjo lamentis malantaŭe, apud la domo, adiaŭis la edzon kvazaŭ por ekzekuto.

En Ĥolmogoro Meĥonoŝin diris al la vojevodo:

— Alveturigis mi al vi, Aleksio Petroviĉ, fiŝiston-rudriston: li mem per la propraj okuloj vidis sur la sveda flagŝipo rudriston Rjabov-on, scias ekzakte, ke tiu rudristo al la svedo transiris. Por la kapitan-komodoro ĉi Rjabov estas la unua amiko. Nun rezonu...

Prozorovskij aĥis, kaptis sian kapon:

— Aj, judasoj, aj, latronoj, aj, perfiduloj...

— Pensu firme!

— Vi mem ja kion pensas, leŭtenanto?

Meĥonoŝin kuntiris la brovojn, silentis longe, poste

prononcis per grava voĉo, firme, kvazaŭ hakis:

— Perfido.

— Ĉu ili fordonos Arĥangelskon?

— Fordonos, kaj Ievlev mem, hunda ido, la ŝlosilojn al ili donos.

Prozorovskij klakis per la polmoj, ordonis enkonduki Longinov-on. La rudristo eniris, kvazaŭ ne la unuan fojon, en la domon de la vojevodo, dormeme pririgardis tapiŝojn, pendigitajn sur muroj sabrojn, deziris eksidi, la vojevodo kriis al li.

— Nu-nu, — diris Longinov, — kial krii do? Laciĝis mi, sur mia ĉevalaĉo tiom rajdinte...

— Parolu! — ordonis la vojevodo.

— Sed kion paroli do?

— Kiel Rjabov-on perfidulon vi vidis, kion vi aŭdis, ĉion laŭ ordo...

Longinov sen deziro, sed precize, komencis rakonti. La vojevodo aŭskultis avide, kapjesadis, konsentadis:

— Jen, jen, jen! Aj-aj! Jes, jes...

3. Ataĉjo Krikov al ili montros!

— Oni pafas! — diris Demĉjo. — Ĉu vi aŭdas, oĉjo!

— Mi aŭdas, silentu! — respondis Rjabov.

— Kaj kiom da tempo ili pafas kaj pafas! — ree diris Demĉjo. — Ĉu helpo al ili venis?

— Silentu do! — petis la rudristo kaj alpremiĝis per la orelo

al la septo, sed nun iĝis aŭdeble malpli bone, ol ĉe la pordo. Bruante per la ĉeno, li ree ekiris al la pordo.

— Ĉu soldatoj? — demandis flustre Demĉjo.

— Dogano! — same flustre, sed ĝoje diris la rudristo. — La doganejo, Atanazio Petroviĉ batalas.

Ree batis kelkaj oftaj tondraj pafoj, kaj tuj io falis, peze susurante je la ŝipa rando. Supre, en la pobkastelo, sonis krioj, ŝrikoj, ĝemoj. Ĉi tien ĉio atingadis pli obtuze, pli mallaŭte, sed tamen estis kompreneble, ke supre okazas batalo.

— Kiom do da ili estas? — demandis Demĉjo. — Ni antaŭ nelonge en la skansoj estis, tie estas nemulte da doganistoj. Ĉu ili eltenos? Kaj da svedoj...

La rudristo forsvingis, fiksaŭskultante. Supre oni plu pafadis, nun pafoj venadis de la pruo, kaj sur la pobferdeko iĝis kvazaŭ malpli laŭte. Kaj poste iĝis tute mallaŭte.

— Oni finis ilin! — lace eksidante, diris Demĉjo.

Rjabov same eksidis; en mallumo estis aŭdeble, kiel li spiras.

— Ĉu finis? — demandis Demĉjo.

— Ankoraŭ atendu! — kun minaco en la voĉo respondis Rjabov. — Tro hastas vi.

Supre kun nova forto ektondris pafoj. Rjabov diris:

— Jen al vi «finis». Ataĉjo Krikov al ili montros ankoraŭ, ricevos ili kun li malfeliĉon...

Ree komencis hurli, krii la svedoj, kun tondro, frapante per feritaj kaj lignaj ŝuoj, ekgrimpis supren laŭ la ŝtuparo. Pretere

oni trenis iun — ĝemantan kaj kriegantan.

— Vundito, eble! — diris Demĉjo.

— Certe, vundito! — respondis Rjabov. — Ne ŝoviĝu, kien ne necesas, kaj vi ne estos vundita. Kion ili ĉe ni bezonas? Kie estas ilia tero, kaj kie — la nia? Dvinan flanon ili ekdeziris, jen — ricevis la flanon! Kaj tio ankoraŭ estas floroj, poste ili berojn prenos.

Li ree komencis avide aŭskulti. Malsupren, preter la ĉenkesto, oni plu trenadis ĝemantajn kaj oĥantajn svedojn — ili, probable, estis forte batitaj tie, supre, kie estis okazanta la batalo, — kaj renkonten laŭ la ŝtuparo, draste insultante, bruante per sabroj, lancoj, muskedoj, grimpadis aliaj — anstataŭ la vunditoj kaj mortigitoj.

— Jen, venis ili kaŝe! — subite kun gaja kolero en la voĉo diris Rjabov. — Jen, trairis ili la skansojn sen eĉ unu pafo, aĉetis la doganistojn. Certe, en la urbo oni jam alarmon sonorigis, en la fortreso sur remparoj kanonistoj staras kun meĉoj, kaj ĉi tie, laŭ Dvino, post ĉiu arbusto estas ĉasisto!

4. Dragonoj, al helpo!

Jam ĉe la unuaj pafoj sur la ŝipo dogana kanonisto Akinfiev sendis sian subulon soldaton Smirnoj-on iri al dragona leŭtenanto Meĥonoŝin por ordono — pafi per la kanono. Soldato Smirnoj, antaŭ nelonge eksciinta, ke la svedaj latronoj pendumis apud Sosnovco lian maljunan avon rudriston Smirnoj-on, plu estis kvazaŭ kontuzita, ne tuj respondadis, kiam oni vokis lin, ne tuj komprenadis, kion oni deziras de li.

— Steĉjo, mi al vi diras! — ripetis Akinfiev, klopodante sub

la ŝedo apud sia kanono.

Smirnoj leviĝis de ŝtipo, sur kiu li sidis, kulpe redemandis, kien iri, kaj, rapide trakurinte la ekzercoplacon, ŝoviĝis en la domon de la leŭtenanto. Tie li ne trovis lin kaj jam malpli rapide direktis sin al la bordo, kie dense amasiĝis dragonoj, fiksaŭskultante bruon de la batalo sur la latrona ŝipo.

— Ĉu la leŭtenanton vi ne vidis, knaboj? — demandis Smirnoj.

— Ja li ĉi tie eĉ ne estis! — respondis alta, fortika dragono Drozdov.

Aliaj dragonoj same diris, ke ne vidis la leŭtenanton. Smirnoj ankoraŭ puŝiĝis en la amaso kaj kuris al la gvatturo. Tie estis deĵoranta kaj rigardanta per lorno doganisto Jakovlev, malsana je febro.

— He, Aleksandro Ivanoviĉ! — kriis, levante la kapon, Smirnoj.

Jakovlev estis soldato maljuna, solida, kaj aliaj doganistoj kun dragonoj kutimis estimi lin.

— Nu, kion al vi, Stefano? — demandis desupre Jakovlev.

— La leŭtenanton mi serĉas. Ĉu li ne estas sur la turo?

— Ne trovos vi lin! — enigme respondis Jakovlev.

Smirnoj pensis iom kaj leviĝis al li supren. El ĉi tie estis klare videblaj ekbriloj de pafoj sur la mezferdeko kaj la pobferdeko de la sveda ŝipo. Smirnoj demandis:

— Kie do estas la leŭtenanto, Aleksandro Ivanoviĉ?

— Ja fuĝis li, hundaĉo! — grincante per la dentoj kaj forte

envolvante sin en peltaĵon, respondis Jakovlev. — Trans la gardistejo li mem stalonon selis kaj ekgalopis.

— Ĉu fuĝis?

— Jes, fuĝis.

— Kiel do ni nun? Ĉu ni pafu aŭ ne?

— Ja pafu. Atanazio Petroviĉ ordonis, ĉu?

— Ordonis.

— Do pafu por bona sano!

— Akinfiev povas ektimi. Li estas viro timida, ne estas la leŭtenanto — kaj li ne pafos...

Jakovlev pli dense fermis sur si la peltaĵon kaj diris, ke pafi necesas, alie en la urbo oni ne ekscios, ke la latrono venis, kaj ne estos pretaj al renkonto. Kio koncernas leŭtenanton Meĥonoŝin-on, do Smirnoj ne dubu, la leŭtenanto estas hundaĉo, necesas nun ĉion fari mem.

Smirnoj dekuris malsupren kaj transdiris al Akinfiev — pafi. Akinfiev bruligis en la poto kun braĝo la meĉon kaj enpremis ĝin en la fuzeon. Tuj responde tondris kanono ankaŭ en la proksima signala baterio, kaj unu post alia komencis pafi kanonoj laŭlonge de la bordo de Dvino, sciigante la citadelon kaj la urbon pri tio, ke la malamikaj ŝipoj venis, ke duboj ne plu estas, ke la batalo komenciĝis...

Ĉiam pli kaj pli alte laŭ Dvino tondris la pafado, en malgrandaj apudbordaj preĝejetoj, en monaĥejoj, forte, kun hurlo ekbatis sonoriloj, kampuloj-fiŝistoj dvinanoj zonadis sin, eliradis al la bordo kun pikstangoj, kun hakiloj, kun memfaritaj lancoj. En la Nikola-Korela monaĥejo monaĥoj-batalistoj kuris

al la muroj, pordegistoj kun batalhakiloj fermis la knarantan sur rustaj hokoj pordegon, ŝtopis per traboj, ekiris porti supren ŝotron — por batalo.

Dragono Drozdov diris:

— Kio do rezultas? Oni la niajn batas morte, kaj ni rigardas? Aŭdu, sur la ŝipo oni pafas!..

— Sed la leŭtenanto ja mankas? — respondis alia dragono — fortmuskola nigra Miroĥin. — Ĉu sen ordono ni iros?

Laŭ la akvo estis obtuze venantaj batoj de la alarmaj sonoriloj, foraj kanonaj tondroj. La dragonoj ekparolis pli laŭte, al ili aliris Jakovlev, interrompis la disputon:

— Kial vi bruas, kuraĝuloj? Forleporis via leŭtenanto, fuĝis de vi, forlasis sian militistaron. Eksidu sur ĉevalojn kaj sekvu lin. Via afero estas tia — soldata...

Kaj kriis:

— Kanonistoj! Iru ĉi tien!

Smirnoj, kanonisto Ĵoludev, malalta Akinfiev, la dogana skribisto Romaŝkin, al kiu ekdoloris la kruro kaj kiu tial restis sur la bordo, tenisto de la doganistoj Samoĥin kaj soldato Ŝmiglo — aliris pli proksime. Jakovlev laŭte ordonis al ili:

— Prenu muskedojn, atakajn hokojn, la arkebuzon de la gvatturo. Surakvigu la velboaton — ni iros al helpo.

— Jen, kiaj prodoj — al helpo! — diris Miroĥin.

— Ĝuste, prodoj! — respondis skribisto Romaŝkin. — Eble, ni helpos...

La velboaton oni surakvigis rapide, dragono Drozdov kriis:

— Atendu, Aleksandro Ivanoviĉ, ni iras kun vi!

Kaj li ekkuris al la albordiĝejo. Post li, bruante per la botoj sur la tabula kovraĵo, kuris dragonoj, kriis:

— He, ni prenos muskedojn!

— Atendu, dogano!

— Lancojn prenu, knaboj...

Drozdov subite skoldis:

— Haltu! Stulte ni faras! Ĉu ili el la ŝipo velboaton ne rimarkos? Haltu, atendu!

La dragonoj amasiĝis ĉirkaŭ li, li klarigis:

— Ili pafos per kanonoj — kaj pereis ni ĉiuj. Malvestiĝu ĝis la subvesto — kaj ni naĝos. Laŭ la ankra ĉeno ni grimpos kun tranĉiloj inter la dentoj, faros tie aferojn. Kaj kiam ni faros embarason, aliaj povas ankaŭ en malgranda boato aliri — kun muskedoj, kun fusiloj... Aleksandro Ivanoviĉ, kie vi estas?

— Jen mi! — respondis Jakovlev.

— Kun la boato iru, vi aliros al la ankra ĉeno, ni vin atendos.

Ili rapide komencis demeti la kaftanojn, la piedvestojn; krucosignante sin, ili saltadis en la malvarman akvon. La tranĉilojn la dragonoj tenis inter la dentoj. Ili naĝis silente, singarde, penis, ke ne estu bruo. Jakovlev sur la bordo febrotreme kuntiriĝadis, ĝemadis:

— Nu, diabloj! Nu, bravuloj!

La unua laŭ la ankra ĉeno ekgrimpis Drozdov, elŝovis la kapon, tuj ekvidis hokstangon, saltis kaj, kaptinte la

hokstangon per la fortikaj muskolaj manoj, turnante ĝin super si, ĵetiĝis antaŭen. Tuj du svedoj falis, li faligis la trian, tiutempe aliaj soldatoj estis saltantaj sur la ferdekon — nudaj, kun tranĉiloj inter la dentoj, ŝrikante per sovaĝaj voĉoj, por pli timigi la svedojn.

— Trabatiĝu al la viaj! — kriis Drozdov, svingante la hokstangon. — Ni iru mure, amikoj!

Tuj aliris la boato kun Jakovlev.

Malalta Akinfiev komencis akcepti de la boato fusilojn — trenadis supren sur ŝnuro, poste ree ĵetadis maŝon. La dragonoj kaptadis muskedojn, fusilojn, alŝutadis pulvon, celadis, pafadis. Baldaŭ sur la ferdekon grimpis Jakovlev, komencis starigi la faman doganan arkebuzon sur la stangon, minacis:

— Jen vi de mi tuj ricevos!

Li longe celis — por pafi trafe, fiksis la arkebuzon kaj tiel tondris, ke la svedoj kriis:

— Kanono, ili havas kanonon, kanonon kun si altrenis...

Drozdov demandis brulvunditan, malheliĝintan Prokopjev-on:

— Kie do estas la kapitano?

— Unue ni kune batalis! — diris Prokopjev. — Vidis mi — ilian eskortulon li faligis, ankoraŭ sabris malamikojn. Poste li kvazaŭ malaperis. Kaj poste mi ree lin vidis, li estis jam sen la kaftano, tute disŝirita, en sango...

— Ĉu viva?

— Estis viva.

Drozdov kliniĝis super mortigita sveda oficiro, deŝiris de li mantelon, surĵetis sur siajn nudajn ŝultrojn, plendis:

— Frostiĝis mi en malvarmo.

Kaj komencis instali la muskedon pli oportune. La svedoj, kriegante, vigligante sin per krioj, ree ekiris kontraŭ la rusoj...

5. La lasta renkontiĝo

Atanazio Petroviĉ, ŝirmante la bruston per la malŝargita pistolo, estis malrapide, singarde trairanta al la siaj. Ĉie estis muskedaj pafoj, svedoj pafadis, starante sur bareloj, sur savboatoj, sur la pobferdeko; matrosoj, kvazaŭ ombroj, grimpadis laŭ vantoj, por el tie, desupre, pafi al la doganistoj kaj dragonoj. Sed dragonoj ĉiam venadis kaj venadis, — la pafado kun ĉiu minuto iĝadis ĉiam pli furioza.

Li pasis ankoraŭ kelkajn paŝojn antaŭen, sed tiam iu svedo rekonis en li ruson kaj furioze atakis lin. Krikov kuris reen, fajfis en sia maniero, kiel li fajfadis en ĉasado — stride, kun abrupta ŝanĝo; poste li ekkuris zigzage, plu fajfante, por ke la doganistoj sciu — li estas viva, kun ili, li tuj venos. Apud la ĉefmasto al li impetis ankoraŭ tri svedoj, ies forta mano ĵetis sub liajn piedojn ŝnuron kun pezaĵoj, sed li transsaltis ĝin kaj kliniĝis, kiam del Robles ĵetis al li lancon. Ili ĉasis lin, kiel beston, kaj subite momente perdis lin: li plonĝis en lukon, sur la manoj glitis laŭ la apogiloj de la ŝtuparo kaj alpremiĝis al kapstano.

Kiel iam, prepariĝante serĉi sur fremdlanda ŝipo falsan arĝenton aŭ aliajn malpermesitajn varojn, li ĉirkaŭrigardis kaj fiksaŭskultis: jes, ĉi tie nemalproksime estis la ŝipa malliberejo — la ĉenkesto, tie necesis rigardi — ĉu ne estas tie rudristo

Rjabov. Li faris paŝon tien, sed retropaŝis ree — iu malsupre estis rapide iranta al la ŝtuparo.

Atanazio Petroviĉ momente leviĝis supren kaj tuj ekvidis, ke el la luko renkonten iras homo, en kiu li tuj rekonis la anglon James-on, sian eksan estron, pro kiu li iam penis pendumi sin; li rekonis lian palan langvoran vizaĝon, la nevuson ĉe la buŝo, la perukon, la longan valonan spadon kun manŝirmilo, kovritan per gemoj. Kaj James same rekonis Krikov-on, — lia vizaĝo tremeris kaj tordiĝis.

— Jen al kiu vi nun servas, hunda ido! — mallaŭte diris Krikov. — Jen kun kiu vi al ni gasti venis...

— *Give back!*[115] — kriis James kaj elprenis per la dekstra mano sian longan spadon el la ingo. En la maldekstra mano li havis mallongan ponardon kun kloŝo, tratranĉita per etaj kaj kurbaj truoj por tio, ke la pinto de la spado de la kontraŭulo enfiksiĝu en tiu ŝildeto.

— Jen, kia birdo! — ree mallaŭte, kun malestimo, diris Krikov. — Tranĉilon ruzan akiris, judaso!

Kaj li komencis fari atakpaŝojn per sia spado, nelonga kaj malpeza, kiel rapiro, penante piki tiel, ke ĝi ne trafu en la kloŝon de la ponardo. James malrapide retropaŝadis kaj perdadis fortojn, la senbrida premo de Krikov estis forkonsumanta lin. Atanazio Petroviĉ kvazaŭ ne rimarkis, ke la longa spado de James jam plurfoje enpikiĝis en lian korpon, ke sango surverŝas la okulojn, ke la ŝultro rigidiĝas. Li firme iris antaŭen ne por vundi la perfidulon, sed por mortigi lin, kaj peladis James-on sur la ferdeko ĝis kiam alpremis lin dorse al

115 Malantaŭen! *(angle).*

la rando de la luko kaj enpikis sian spadon en lian koron, trabatinte per terura rekta bato la toledan brustokirason.

Mortante, James kriis, liaj manoj en flavaj gantoj kun funeloj per konvulsia fortostreĉo penis elŝiri la spadon el la brusto, sed fortoj jam ne estis, la spadon elŝiris Krikov mem. Kaj tiam la mortinto, etendiĝinte tuta, falegis per la blanka vizaĝo sur la peĉitajn tabulojn de la ferdeko. Lia valona spado — la armilo, per kiu li servis al tiom multaj ŝtatoj, — deruliĝis flanken. Atanazio Petrovič kun peno kliniĝis, rompis la spadon de James je la genuo, elĵetis ambaŭ rompaĵojn trans la ŝiprandon, poste malrapide ĉirkaŭrigardis: sur la pobkastelo inter bareloj kaj pakoj, apud la kofro, ĉe la ĉefmasto kaj plue sur la kanona ferdeko, apud la eniraj kaj lumaj lukoj, sur ŝtuparoj, ĉe la rostroj, apud la kuireja tubo — ĉie estis okazanta batalo. Rusoj kaj svedoj intermiksiĝis en krepusko, sub pluveto; en Dvina rufa nebulo estis malbone videble, kaj nur oranĝkoloraj ekbriloj de pafoj de tempo al tempo prilumadis konatan doganan kaftanon, la plu flirtantan rusan flagon, torditan per morta sigelo vizaĝon de mortanta sveda soldato...

Krikov viŝis sangon de la frunto, komencis rememori, kia afero ankoraŭ ne estas farita. Rememorinte, kia estas tiu afero, li malleviĝis laŭ la ŝtuparo kaj ekiris tien, kie, laŭ lia supozo, estis la ĉenkesto, en kiu devis esti malliberigita Rjabov. Spadon li ne plu havis. Li iris, ŝanceliĝante, batiĝante je la septoj de la koridoro, liaj piedoj ne obeis al li, sed la kapo estis klara tiom, ke dum la vojo li elprenis el mortezo rompostangon kaj hakilon, kiuj pendis ĉi tie kune kun siteloj kaj hokstangoj por okazo de incendio. Sentinelo ĉe la ĉenkesto ne rekonis rusan oficiron en la sangokovrita homo kun rompostango kaj hakilo

kaj flankeniĝis, por tralasi lin pluen, sed Atanazio Petroviĉ ne iris pluen, sed levis la rompostangon kaj batis la helblondan svedon al la kapo. La svedo ankoraŭ iom staris, poste komencis sidiĝi sur la ferdekon, kaj Krikov enmetis la rompostangon en krampon, faris baskulon kaj ŝiris la pordon. Olea lampo malhele prilumis Rjabov-on. Li staris en ĉenoj kaj rekte rigardis al Krikov. Post la rudristo, ĉe lia ŝultro staris Demĉjo — same katenita kaj, larĝe malferminte la nigrajn okulojn, kiel Rjabov, rigardis al Atanazio Petroviĉ.

— Jen! — per raŭka, pena voĉo ne tuj diris Krikov. — Troviĝis! Jen rompostango — iru...

Li faligis la rompostangon sub la piedojn de Rjabov, apogis sin per la mano sur la pordofosto. Li ŝanceliĝis, kurantaj fajreroj aperis antaŭ la okuloj. Li falus, sed Rjabov subtenis lin firme kaj fidinde, kun tia karesa forto, ke Atanazio Petroviĉ ne deziris plu moviĝi, kaj al li ŝajnis, ke li faris jam ĉion kaj nun povas ripozi. Sed tuj li subite rememoris la maljunulon, kiun li vidis antaŭ nelonge sub la plafono de la pobferdeko, la flavan maljunulon kun kartilagaj oreloj, la estron de la latrona eskadro. Lin necesis mortigi nepre, kaj Atanazio Petroviĉ elŝiriĝis el la zorgaj manoj de la rudristo, restarigis la spiradon, raŭke prononcis:

— Vi al la pruferdeko trabatiĝu! Tie estas la niaj...

— Sed atendu! — diris la rudristo. — Kien vi, Atanazio Petroviĉ! Ne povas vi...

— Jen, kiaj, — ne aŭdante Rjabov-on, kun peno estis diranta Krikov. — Ne, perfido ne estis. Mi scias — perfido ne estis...

Li ree viŝis la sangon kaj ŝviton de la vizaĝo kaj, ne retrorigardante, kun hakilo en unu mano kaj kun rezerva pistolo en la alia revenis al la luko kaj leviĝis laŭ la ŝtuparo. Furioza bruliganta soifo turmentis Atanazion Petroviĉ-on, la okulojn kovris fajreroj kaj nebulo, sed la koro batis egalmezure, kaj sento de feliĉo kvazaŭ duobligis liajn fortojn.

— Ne estis perfido! — flustradis li fojfoje. — Ne estis!

La piedoj malbone tenis lin, kaj la vundoj, kiujn li antaŭe ne rimarkadis, nun doloris tiel, ke li sufokiĝadis kaj apenaŭ retenadis sin, por ne krii, sed tamen iris al la admirala kajuto, al la flava maljunulo, al la admiralo, kiu venigis ĉi tien la eskadron...

— Jene, — raŭke diradis Atanazio Petroviĉ, — vidu, kia!

Kaj li iris, kaŝante sin de la svedoj kaj fiksaŭskultante la pafadon, kiu nun aŭdiĝis malproksime. La premo de la doganistoj kaj dragonoj estis malfortiĝanta, kaj Atanazio Petroviĉ same estis perdanta fortojn, sed tamen ili ankoraŭ plu batalis, kaj li same devis ankoraŭ batali.

Kiam Atanazio Petroviĉ malfermis antaŭ si la pordon en la admiralan kajuton, la flava kalva maljunulo, kun lanugo sur la tempioj, estis bukanta sur si helpe de servistoj rimenojn kaj rimenetojn de ŝtala batala armaĵo. Sur tablo staris orita kasko kun virkokaj admiralaj plumoj, sur marokena fotelo pendis mantelo, subŝtofita per ruĝa veluro, kaj sur la mantelo supre kuŝis itala spado en kovrita per juvelŝtonoj tego.

Atanazion Petroviĉ-on oni rimarkis ne tuj, ĉi tie estis multaj homoj, li sukcesis ĉirkaŭrigardi, serĉante gajnan pozicion.

«La admiralo! — pensis Krikov kaj miris — tian malvivan,

tian senmovan vizaĝon havis la maljunulo, alportinta suferon, detruon kaj morton sur siaj ŝipoj. — Jes, la admiralo! Lin nepre necesas mortigi! Tiam la eskadro restos sen komandanto, kaj por la niaj — tie, en la fortreso — estos pli facile frakasi ilin!»

Sed Gyllenstierna ekvidis la sangokovritan, brulvunditan, apenaŭ tenantan sin sur la piedoj ruson, ekvidis la hakilon en lia mano, la longan tubon de la pistolo, ion mallonge kriis, kliniĝis. Al Atanazio Petroviĉ ĵetiĝis homoj. La pafo tondris vane, la admiralo nur kaptis sian ŝultron. Atanazio Petroviĉ apogis sin per la dorso al la kajuta septo, levis la hakilon, sed tuj faligis ĝin. Al li oni pafis el ĉiuj flankoj, la admiralan kajuton nebuligis griza pulva fumo, kaj en tiu fumo kapitano Krikov ankoraŭ longe vidis ombrojn kaj poste akran tranĉantan lumon. Tiuj ombroj, kaj tiu lumo, kaj ankoraŭ sonoro, kiu sonis en la oreloj, — estis morto. Kaj kiam la svedoj finfine surfalis sur lin kaj faligis apud la marokena fotelo sur la plankon — tio estis jam ne li, Atanazio Petroviĉ Krikov, sed nur lia senviva sangokovrita korpo.

6. Levu flagojn de la reĝo de Svedio!

Pluvetis plu.

La svedoj dufoje trumpetis atakon, la rusoj rebatadis.

Urquhart ordonis sonorigi sonorilon, al klarionistoj ludi signalon «ni postulas helpon». Tio estis malhonoro — la flagŝipo de la eskadro ne povis venki la doganistojn kaj dragonojn. De aliaj ŝipoj de la eskadro ekiris boatoj kun soldatoj kaj matrosoj. Matene artileriisto Plomgren laŭ ordono de Gyllenstierna eltrenis sur ŝnuregoj malpezan kanonon, antaŭ

la kanono matrosoj per hokoj estis puŝantaj pakojn kun stupo. La subadmiralo, griz-kafkolora pro la galmalsano, mem direktis la kanonon, la matrosoj defaligis la pakojn, Plomgren enpremis la meĉon en la fuzeon. Mitrajlo kun ŝriko batis tien, kie fiksiĝis la rusoj. Okke en paroltubon kriis:

— Kapitulacu, aŭ al ĉiuj estos fino!

Al li oni ne respondis. Jakovlev skrupule, longe celdirektadis la doganan arkebuzon, flustrante:

— Ĝi nemalbone estos, se pli dekstre celi, je du arŝinoj, tiam ĝuste trafos...

Kaj li trafis: Okke falis sur la ferdekon kun trabatita frunto.

Gyllenstierna ree mem direktis la kanonon. Ŝrikis mitrajlo, kaporalo Prokopjev leviĝis, batiĝis per la ŝultro al la ŝiprando, kvietiĝis por ĉiam. Apud li kuŝis la malalta Akinfiev — same malviva. Pli malproksime kvazaŭ ekdormis, laciĝinte en laboro, alia kanonisto — Ĵoludev. Kaj skribisto Romaŝkin, kaj dogana tenisto Samoĥin, kaj soldato Ŝmiglo — estis mortigitaj, nur Jakovlev ankoraŭ plu penis enmeti kuglon en la tubon de la fama arkebuzo, sed la manoj jam ne obeis lin, la ŝargostango elglitadis el la fingroj. Estis diligente pafanta Smirnoj, apud li kuŝis kvar muskedoj, — li pafadis vice el ĉiu. Malfacile spiris vundita tute, sanganta dragono Drozdov. Perdante lastajn fortojn, nenion aŭdante, li ĉiam penis turni la pruan kanonon, sed ne sukcesis kaj ree kuŝiĝis sur la ferdekon.

La kanono de Plomgren batis ankoraŭ foje, kun ŝriko, kun hurlo ekflugis mitrajlo. Drozdov levis la kapon, tuŝis Jakovlev-on, tiris la baskon de lia kaftano.

— Aleksandro Ivanoviĉ! — vokis li, ne aŭdante sian voĉon.

La doganisto ne moviĝis.

— Aleksandro Ivanoviĉ! — pli laŭte kriis la dragono.

Ĉio silentis ĉirkaŭe. Drozdov kun peno turnis sin sur la flankon, ekrigardis al la proksima verda larĝa bordo de Dvino. Li avide rigardis al la herbo, al la ĉeval-alligejo, al la gvatturo, kaj subite iu ŝirmis de li la tutan bordon.

Drozdov levis la okulojn, ekvidis Smirnoj-on.

— Kion vi! — demandis la dragono mire.

Doganisto Smirnoj, leviĝinte, garde elprenis el la rigidiĝantaj manoj de Jakovlev la arkebuzon kaj estis instalanta ĝin, por pafi...

— Lasu! — ordone, sufokiĝante komandis Drozdov. — Lasu! Iru el ĉi tie, knabo! Iru! Sola, sed vi restos viva, diros, kiel nin leŭtenanto Meĥonoŝin forlasis. Iru! Vi ĝisnaĝos, eble...

Smirnoj ion respondis, Drozdov ne distingis, svingis la kapon:

— Iru! Mi al vi ordonas, obeu! Unuope vi ne multe militos, ni laboris nemalbone. Kaj nun — iru!..

Smirnoj kisis Drozdov-on al la vango, plorsingultis, ekrampis al la ŝiprando. En la sama tempo la dragono komencis ekstari. Altirinte al si sabron, li, apogante sin sur la stango de la dogana vimplo, ekstaris sur la genuojn kaj, kolektinte ĉiujn fortojn, per larĝaj oblikvaj falantaj paŝoj, levinte super la hirta sanga kapo la brilantan sabron, ekiris kontraŭ la svedoj...

La svedoj kriis, kelkaj muskedoj pafis preskaŭ samtempe, sed la dragono kun la sabro plu iris.

Plomgren, paliĝinte, montrante la dentojn, enpremis la brulantan meĉon en la fuzeon, ree ekŝrikis mitrajlo, sed la ruso kun la sabro, levita por la lasta bato, plu iris kaj iris sur la kovrita per sango kaj kadavroj ferdeko. La mantelo sur li flirtis, la maldekstra mano alte tenis la doganan vimplon.

Tiam la ŝipa ekzekutisto Svante Bagge pafis per pistolo. Li celis tre longe, kaj tio estis pafo ne de militisto, sed de ekzekutisto. La sabro elfalis el la mano de la dragono, la vimplon Drozdov alpremis al si, faris ankoraŭ paŝon kaj falegis sur tabulojn de la ferdeko.

La batalo finiĝis.

Horon poste Gyllenstierna eliris sur la pobkastelon, malleviĝis en fotelon, alportitan de kajutvaĉanto, kaj ordonis al Urquhart:

— Ĉiujn kadavrojn, krom la korpo de kolonelo James, — ekster la ŝiprandon.

— Jes, *herre* subadmiralo.

— Lavi la ferdekon, por ke ne restu eĉ unu sanga makulo! Malfermi la kanontruojn! Levi flagojn de la floto de lia moŝto reĝo de Svedio! Ni ne plu estas negocistoj...

— Jes, *herre* subadmiralo!

Poste Gyllenstierna demandis:

— Kiom ni perdis?

— Multajn, *herre* subadmiralo, tre multajn. Sed la ĉefa nia perdo estas perdo de vigleco...

— Kion vi volas diri?

— Post tiu nokto la homojn ne eblas rekoni, *herre* subadmiralo. Nun ili timas la moskvianojn, kaj tiuj tri tagoj, kiujn vi promesis al ili por diboĉado en Arĥangelsko, ne ŝajnas al ili tro malavara premio...

La subadmiralo silentis.

— Kiel vi fartas? — demandis Urquhart.

— Malbone! Je du fingroj pli dekstre — kaj la kuglo de tiu frenezulo kuŝigus min por eterne.

Urquhart kompate balancis la kapon.

— Tiu frenezulo, — diris Urquhart, — penis liberigi nian piloton, sed Granda Ivano estas fidela al lia reĝa moŝto. Li ne fuĝis, malgraŭ tio, ke li povis fari tion preskaŭ sen obstakloj. Li havis rompostangon, por liberiĝi de la ĉenoj...

— Jen kiel! — prononcis Gyllenstierna.

— Ĝuste tiel, *herre* subadmiralo. Nun mi estas certa pri tio, ke la piloton ni povas fidi.

— Tio estas bona, ke ni povas fidi la piloton! — malrapide diris Gyllenstierna. — Tio estas tre bona...

Ĉapitro sepa

> Batalistoj! Jen venis la horo, kiu decidos la sorton de la patrujo.
>
> *Petro I*

> Ekde tiu ĉi minuto la armeo ricevas duoblan soldon.
>
> *Frederiko II*

1. Arĥangelsko pretas al batalo!

Jegorĉjo Pustovojtov sur sia vigla virĉevalo estis trote ĉirkaŭveturanta la urbon. Super Arĥangelsko naĝis senĉesa, longa sono de alarma sonorado. Sub tiu zumado de sonoriloj kanonistoj kun pafistoj, dragonoj kaj rajdistoj estis fermantaj sur la kajo trairejojn per fostoj kaj grandegaj lignobaraĵoj, alruladis kanonojn, trenadis lignajn ujojn kun pulvo, kunmetadis piramide kuglegojn. Sur la larĝaj muroj de la Komerca korto militistoj purigadis kanontubojn, starigadis sur stangojn malnovajn arkebuzojn, sur batalaj turoj direktadis kanonojn al tiu flanko, kie povis halti la malamikaj ŝipoj.

Ŝprucigante likvan koton, el la Kanona kaj Pulva kortoj, tondrante, kuris sur kurbaj stratetoj ĉaroj — veturigis mitrajlon, pulvon en kestoj, rompostangojn, levstangojn, ŝtopilojn. El domoj, fermante post si la pordegojn, unu post alia iradis metiistoj, iu kun lanco, iu kun ĉasista longtuba fusileto, iu kun malnova arkebuzo, iu kun antikva glavo, iu kun forko. Pomorinoj, spertaj fiŝistaj edzinoj, adiaŭadis la edzojn silente, kun riverenco. La viroj same riverencadis, diradis nelaŭte:

— Pardonu, se estas pro kio!

La edzino respondadis:

— Kaj ankaŭ vi min pardonu, patro!

Post patroj iradis filoj — pli aĝaj. Iam oni paŝadis al Dvino per grandaj familioj — avo, filo, nepoj, — ĉiuj strikte zonitaj, kun saketoj, en la saketoj, krom plumbaj kugloj, pulvo kaj ŝtopiloj, kuŝis senruza provianto — flanoj, fiŝo, iu havis eĉ duonstofon da brando. Sur la turon de la Komerca korto tiaj familioj eniradis mastre, aranĝadis sin por longe; avo, multsperta ĉasisto, gvidinta brigadojn en tundron, disstarigadis la filojn kaj nepojn kiel li opiniis necesa: iun — kiel gvatanton, iun — kiel ŝarganton, por mordi kartoĉon, alŝuti pulvon, iun kiel rezervulon — por ŝanĝo. Farinte la aferojn, ili kuŝiĝadis dormi ĝis la tempo: kiam la svedo venos — jam ne eblos dormi.

Al Jegorĉjo Pustovojtov unu tia avo diris severe:

— Nu, kial vi rigardas, oficiro? Vi al ni ne rigardu, vi al viaj soldatoj rigardu. Ni ŝargon vane ne malŝparos, ni havas nian propran pulvon, ne ŝtatan. Iru, oficiro, iru, ni dormi bezonas, dum estas libera tempo...

Gaje iĝis en la koro de Jegorĉjo, kiam li ĉirkaŭiris la turojn, sur kiuj lokiĝis per familioj la dvinanoj. Ankoraŭ pli gaje iĝis, kiam li venis al la Solombala ŝipkonstruejo — rigardi laŭ ordono de Silvestro Petroviĉ, kiel oni prepariĝas ĉi tie al la batalo.

Ĉi tie ŝipmajstro Koĉnev kun la donanoj estis levanta sur ŝnuregoj supren, sur ferdekojn de nefinkonstruitaj ŝipoj, kanonojn, per kiuj li elpensis pafi per mitrajlo al la malamiko,

kiam tiu, ne atendante por si malfeliĉon, atingos la ŝipkonstruejon. Ĝuste tiuj samaj homoj, kiuj kontraŭvole konstruadis la ŝipojn, nun ne foriradis el la Ŝipa korto, kvankam la pordego estis plene malfermita kaj la gardistaro ne plu gardis la laborantojn. Sub eta pluvo, kiu senĉese susuradis sur Dvinaj akvoj, ĉarpentistoj, forĝistoj, lignaĵistoj, kalfatristoj, velmajstroj, boristoj, portistoj, peĉfaristoj trenadis supren, laŭ ŝanceliĝemaj ŝtuparoj, kuglegojn, per baskoj de ŝiritaj kaftanoj kovradis pulvujojn, por ke ili ne malsekiĝu, senkolere paroladis kun pafistoj, kiuj ankoraŭ hieraŭ gardadis la feritan pordegon.

Poste, en ĉareto, per knuto pelante fortikan eksstalonon, alveturis Ivano Kononoviĉ, eligis la piedojn el sub drelikaĵo, varmiĝante, ĉirkaŭiris nefinkonstruitan okdekkanonan ŝipon, balancis la maljunan kapon:

— Nu kion diri? Tian belon Dian bruligi? Kiom oni laboris, kiom da ŝvito homa, da sango estis elspezita — ne eblas kalkuli! Aĥ, aĥ, damne...

Li ekvidis Jegorĉjon, plendis:

— Kial do vi, sinjoroj militistoj, tiel ĝene faras...

Viroj, laboruloj, rigardante al Ivano Kononoviĉ, same balancadis la kapojn. Unu pli juna, pometvanga, en malfermita kaftano, diris:

— Ni rebatos, Ivano Kononoviĉ!

Alia, tre muskola, per malbonkora voĉo promesis:

— Ni, sinjoro majstro, ĉi tie ne sur matracoj dormis, ne kokojn kun bovaĵo manĝis. Ni estas nun kolera popolo. Ni akceptos la svedon!

El homamaso iu etendiĝis, leviĝis sur la piedpintojn, kriis:

— Almenaŭ hakilojn donu! Eĉ hakilojn oni per seruro ŝlosis! Donu hakilojn, Ivano Kononoviĉ!

Jegorĉjo trairis proksime al la majstro, diris arde:

— Donu hakilojn, Ivano Kononoviĉ, je mia respondeco...

La viroj ekbruis, alpremiĝante:

— Ĉu kun nudaj manoj eblas venki?

— Ni estas de la Dvina tero, ni trompon ne scias...

— Kiam konstrui ŝipojn — vi nin vokas kaj laborigas kontraŭ volo, sed kiam kontraŭ la svedo defendi...

— Pafistoj solaj ne sukcesos...

Desupre de sur la ferdeko malleviĝis tute malseka pro pluvo, kun griza pro laco vizaĝo, majstro Koĉnev, vokis pafistan duoncentestron. Ili konsiliĝis. Jegorĉjo diris firme:

— En la nomo de la kapitan-komodoro mi ordonas — la hakilojn doni!

Ivano Kononoviĉ prenis rompostangon, deŝiris de la tenejo pezan pendoseruron. La viroj viciĝis. Ivano Kononoviĉ persvadadis:

— Bonfarantoj, pro la hakiloj oni de mi prenos monon, vi post la batalo mem redonu, mi petas. Miajn enspezojn vi ja scias — ne grandaj estas, la hakiloj estas grandprezaj, vi mem komprenu...

La laboruloj elektadis por si hakilojn ne haste, ĉiu serĉis pli bonan, por ke ne estu breĉetoj, kaj pli pezan, kaj pli oportunan.

— Pli rapide, fraĉjoj! — petis Jegorĉjo. — Tiel vi ĝis la

nokto ne sukcesos...

Vireto kun rondaj okuloj kaj barbeto, elstaranta flanken, respondis kolere:

— Kial pli rapide? Vi jen spadon havas — piku kiom deziras, kaj ankoraŭ tranĉilon, kaj pistolon. Pli rapide...

La laboruloj, elektinte hakilojn, iris al akrigilo — akrigi la pintojn. Iuj samloke ĉarpentis por si pli oportunajn tenilojn, aliaj surmetadis hakilojn sur longajn tenilojn, — rezultadis io kiel halebardo, sed pli peza.

Koĉnev ruze palpebrumis al la maljuna majstro, diris:

— Hakilon al si kaŝis Ivano Kononoviĉ, mi vidis, la plej bonan...

— Mensogu plu! — subridis la majstro.

— Ja mi vidis, vidis, — ridis Koĉnev, — kial kaŝi de la siaj... Li al ili montros — al la svedoj, nia Ivano Kononoviĉ, ho, montros...

— Ja mi montros! — same subridadis la maljunulo. — Kial ne montri? Mi estis juna — nun rememoros...

— Kaj se svedo al vi per pistolo, Kononoviĉ, tiam kiel?

— Ja tiel, ke mi ne atendos! Mi lin per hakilo regalos, kaj li fuĝos...

— Kaj se ne fuĝos?

— Nu, tiam mi hakmortigos!..

— Ne atingos li vin! — diris Jegorĉjo. — Ni ne lasos. Ĉe ni en la citadelo oni lin tiel akceptos, ke turniĝos li reen al sia tero...

Li adiaŭis la majstrojn, eksidis sur sian virĉevalon, ekrajdis en la urbon. Ĉe la kirko, kun nudaj sabroj, kun severaj vizaĝoj staris matrosoj. Ĥagajo sidis sur ŝtupoj, fumis pipon. En la duonmalfermitan pordon kolere rigardis konsulo Martus, skoldis Ĥagajon, postuladis la vojevodon. Ĥagajo silentis, sidis dorse al Martus.

— Kion li? — demandis Jegorĉjo la fraton.

— Liberigi! — snufante per pipo, respondis Ĥagajo. — Ne, nun li sidos, ripozos...

Jegorĉjo deĉevaliĝis, eksidis apud la frato, rakontis, kion li vidis dum la longa tago. Ĥagajo morne silentis. Sur la katedrala sonorilejo oni ree sonorigis alarmon, sonorigis ankaŭ ĉe Sankta Paraskeva, ĉe Kosmo kaj Damiano. Ĥagajo batpurigis la pipon je la kalkanumo, morne diris:

— Traveturis antaŭ nelonge ĉi tie soldato Smirnoj, li sola en la skansoj restis, ĉiujn la svedoj mortigis... Kaj Meĥonoŝin, hundo, fuĝis. Oni diras, kvazaŭ al la vojevodo en Ĥolmogoron iris...

Jegorĉjo demandis kun timo:

— Kaj Atanazion Petroviĉ-on oni mortigis?

— Ŝajne mortigis! — diris Ĥagajo.

Jegorĉjo mallaŭte oĥis, ekstaris. Ĥagajo kriis al li:

— Vi ankoraŭ lamentu, eĉ pli bone estos! Vi spadon portas, matrosoj al vi rigardas...

El la pordo de la kirko elŝoviĝis la pastro, diris, ke dezirus havi konversacion kun la inda subleŭtenanto kaŝe. Ĥagajo leviĝis, aliris la pordon, svinge enpuŝis la pastron en la

vestiblon, frapfermis la klapon kun grinco.

— Ankoraŭ gardi ilin, hundojn. Kanonojn en sia kirko ili tenas, jen popolo!

Ĉe la albordiĝejo, apud la fortresa velboato Jegorĉjo ekvidis avinon Eŭdoĥa-n. Ŝi staris silente, rigardis al Dvino, al debordiĝantaj kaj venantaj ŝipoj. Jegorĉjo salutis, demandis, por kia afero ŝi eliris en tia tago el la hejmo. La avino respondis per kulpa voĉo:

— Mi ja Silvestron Petroviĉ-on petis permesi veni en la fortreson, li plateton donis, venu, diris, avino, viaj ŝmiraĵoj tre bonas por vunditoj. Kaj Tainjo kun Ivaĉjo tie gastas...

La velboato iris malrapide per remiloj. Renkonten, de la maro, blovis vento, oblikve vipis pluvo. Silentaj, kvazaŭ formortintaj, staris ĉe ankroj la fremdlandaj negocistaj ŝipoj. Malproksime en Solombalo ree batis alarmo, super Dvino eknaĝis maltrankviligaj sonoraj sonoj.

2. «Neniu venkos vin, Svedio!»

Vespere de la maro ekrampis malaltaj, grizaj, malbonaŭguraj nuboj, per puŝoj verŝiĝis pluvo, vento ekfajfis en la ŝnuraro de «Krono». Dvino bruniĝis, ŝvelis, brue batis al la bordoj. En la skansoj estis flamantaj la bruligitaj de la svedoj gardistejo, kazerno de la doganistoj, budoj, en kiuj loĝis la dragonoj.

Grafo Gyllenstierna en kiraso sub leda mantelo, en ŝtalaj genuŝirmiloj kaj kubutŝirmiloj, en kupra orita kasko kun plumoj, staris sur la pobferdeko ĉe la pobrando, apud la rapide turniĝanta ventmontrilo. Klarionistoj, viciĝinte, ludis signalon:

«Ankrojn levu, sekvu min!» Kupraj sonoriloj batis batalan alarmon. La eskadro estis prepariĝanta al batalo: la kanonaj truoj estis malfermitaj, la tuboj de la kanonoj rigardis en la grizan nebulon; soldatoj volvadis kaj levadis supren ledajn septojn de oficiraj kajutoj; soldatajn kaj matrosajn litojn oni forigadis en retojn, sur la rostrojn kaj en la kuirejon, por ke estu nenio troa, por ke nenio malhelpu kaj impliku la piedojn en decidaj minutoj de batalo.

La artileriistoj estis laborantaj ĉe la kanonoj: elprenadis tubajn ŝtopilojn, etendadis takelojn. Artileriaj helpantoj en mallongaj jakoj sen manikoj, en feraj brustoŝildoj — metadis dekstre ĉe la kanono ŝtopileltirilon kaj skovelon, maldekstre pendigadis sakon kun ŝtopiloj, kun bruo ĵetadis sur destinitajn lokojn rompostangojn kaj levstangojn. Ferdekaj matrosoj, ĝemante kaj insultante, metadis inter ĉiuj du kanonoj duonbarelojn kun akvo, super kiuj, fulgante, brulis kanonaj meĉoj. El pulvejoj artileriaj portistoj kure trenadis en korboj kuglegojn, mitrajlon, pulvon. Ŝipaj metalprilaboristoj disdonadis al la ŝipatakaj soldatoj reĝustigitan kaj akrigitan batalan armilaron. Matrosoj-akvoverŝistoj priverŝadis la ferdekojn per akvo, por ke pro bagatelo ne komenciĝu incendio. La ŝipestroj komandadis surtiradon de plektitaj el lineoj retoj super la pobkastelo kaj pruferdeko. Tiuj retoj devis reteni dum batalo falantajn sur homojn pecojn de mastoj kaj jardoj.

Malsupre, laŭ ŝtuparoj kaj pasejoj, matrosoj estis mallevantaj en profundan holdon ĉerkon kun restaĵoj de kolonelo James, malantaŭe iris la eskadra kuracisto, petadis plende:

— Pli garde, respektindaj sinjoroj! Vi ne scias, kian laboron al mi kostis nun prepari tiun ĉi korpon, por ke ĝi ne putru...

La matrosoj, ĝemante, respondadis insulte:

— Nin ja neniu suturos post la morto...

— Nian fraton oni simple ĵetas en maron...

— En lia kontrakto estis skribita ĉio...

— Ĉu en kontrakto aŭ sen kontrakto — ĉiuj ni nun iros al la fundo...

— Kiel vi pensas, *herre* magistro? Per kio finiĝos tiu ĉi damnita ekspedicio?

En la holdo ŝipa metalprilaboristo lutis la kverkan ĉerkon en feran ujon. La militpastro flustris per la lipoj super la mortinto kaj kune kun la kuracisto direktis sin supren, demandante survoje:

— Kie estas pli sendanĝere, *herre* doktoro, dum batalo? Ĉu sub la ferdeka kovraĵo aŭ en la pobkastelo?

Dum vojo ili duope eniris en la salonon kaj drinkis po granda glaso da brando. La pastro ebriiĝis, iĝis larmema, en malgajo plendis, ke vidis malbonan sonĝon, rememoradis sian kvietan patrujon — urbon Haflon. La kuracisto morne subridadis, poste ĵetis ĵetkubon — ĉu para aŭ nepara nombro? Rezultis nepara.

— Ĉu malbone? — demandis la pastro.

— Ne vidos vi Haflon! — diris la kuracisto. — Tamen vi nepre trafos en la ĉielan regnon, ĉar pereos por la sankta afero!

Silente ili leviĝis supren.

Ĉi tie grafo Gyllenstierna estis morne rigardanta en nebulan foron, aŭskultis, kiel interkrias raŭkaj voĉoj de matrosoj:

— Ankro puras!

— Ankro puras, *herre* ferdekestro!

— Ankro puras, *herre* leŭtenanto!

— Ankro puras, *herre* ŝipestro!

Urquhart, bruante per maŝkiraso, aliris al la subadmiralo, diris klare:

— Ankro puras, *herre* subadmiralo!

Grafo Gyllenstierna, ne turniĝante, ordonis:

— Benon, pastro!

La pastro malfirme paŝis antaŭen, preĝe kunmetis la manojn, prononcis balbute:

— Benu nian heroaĵon sankta Brigita!

Granda kupra sonorilo eksonoris por preĝo. Sur la pobkastelo, sur la pobferdeko, sur la pruferdeko, sur la mezferdeko, sur la kanonaj ferdekoj, en la pulvokamero ĉiuj matrosoj, soldatoj, oficiroj, dungitoj, piratoj, rabistoj — de del Robles ĝis Benkt Murdis Amikon — fleksis la genuojn, kunmetis la polmojn, fermis la okulojn, flustrante preĝojn...

La pastro preĝis, sur lia malhelruĝa pro la trinkita brando vizaĝo ruliĝis piaj larmoj...

— Sufiĉas! — diris Gyllenstierna, leviĝante de sur la genuoj.

La granda kupra sonorilo batis ankoraŭ. Tamburoj ekbatis «Militiron por gloro de la reĝo!» Klarionoj sur ĉiuj ŝipoj de la

eskadro ekkantis: «Neniu venkos vin, Svedio!» Grafo Gyllenstierna svingis tukon — «militiro».

Kaj tuj Urquhart per paroltubo prononcis malrapide kaj dise:

— Militiro! Stari sur lokoj, ne paroli inter si, ne fumi tabakon, al batalo havi plenan pretecon...

La ŝipoj malrapide, singarde, unu post alia, estis enirantaj en la larĝan buŝon de Dvino. La kanonoj streĉite kaj minace rigardis el siaj truoj. Sur mastoj vento estis flirtiganta grandegajn tukojn de svedaj flagoj.

3. Bruligu meĉojn!

Ekde la Sankta Kabo mem nevideblaj por la svedoj okuloj gvatis ilian eskadron. Kaj en la samaj minutoj, kiam en la Dvina buŝo grafo Gyllenstierna ordonis levi ankrojn, kampulo en hejmefarita malsekiĝinta ĉemizo elgrimpis el salikaro, kaptis je ŝnura duonbrido sian ĉevalaĉon, kuris apud la ĉevalaĉo kelkajn paŝojn sur ŝmacanta marĉo, saltis, surfalis la dorson de la ĉevalo per la ventro, transĵetis la piedon en bastoŝuo kaj, sovaĝe balancante la kubutojn, ekgalopis tien, kie atendis lin alia kampulo, preta rajdi pluen — al matrosoj, sidantaj apud signala kanono ĉe branĉkabaneto...

Fiŝistoj, metiistoj, monaĥoj en malsekaj sutanoj kaj fiŝistaj botoj, iu kun lanco malantaŭ la ŝultroj, iu kun hakilo sub la zono, iu kun muskedo, — eksidadis sur ĉevalojn, rapidis al la citadelo. Laŭ novaj sekretaj vojoj, laŭ kaŝitaj padoj kuris ĉevaloj, malgrandaj boatoj transportadis la kurierojn trans akvon, se ĝi renkontiĝadis sur la vojo, el ĉebordaj densaj arbustoj, el post fojnostakoj, el post betuloj observadis la eskadron atentaj, kutimiĝintaj al maro, malbonkoraj okuloj de

pomoroj...

Kaj longe antaŭ kiam la observanto de la flagŝipo ekvidis la Novdvinan citadelon, tie sur la ekzercoplaco ekkantis fortresaj klarionoj, sur remparoj, sur turoj, sur muroj alarme ekbatis tamburoj.

Tuj sub eta pluvo, retenante la sabrojn, ekkuris matrosoj al siaj brulŝipoj por prepari ilin al batalo. Per rapidaj paŝoj ekiris sur remparojn, al kaŝitaj ĝis la tempo kanonoj, — kanonestroj, meĉistoj, direktistoj. Kampuloj-peĉfaristoj, ŝprucigante per la bastoŝuoj flakojn, vice ekkuris al la siblantaj kaj gluglantaj kaldronoj kun peĉo — aldoni sekan lignaĵon, por per bolanta kuiraĵo renkonti la malican latronon, se li trabatos sin al la fortresaj muroj. Soldatoj kun muskedoj, kun fusiloj, kun arkebuzoj vice leviĝadis al siaj embrazuroj, dismetadis tie sian militistan ilaron, prepariĝadis stari longe, ĝis ekruliĝos reen la damnita malamiko. Masonistoj, ĉarpentistoj, forĝistoj, portistoj, terfosistoj, ĉiuj, kiuj konstruis la fortreson, kun pezaj lancoj, forĝitaj en libera tempo sur fortresaj ambosoj, kun klaboj, kun akrigitaj tranĉiloj okupadis la truojn, prepariĝante batali laŭ forto kaj sperto, helpi ĵeti ŝtonojn, verŝi peĉon, faligi trabojn sur la kapojn de la latronoj. En unu momento la fortresa korto pleniĝis per centoj da homoj kaj ree malpleniĝis — la homoj instalis sin en siaj lokoj, prepariĝis al batalo, kvietiĝis. Ree estiĝis silento, nur la pluvo susuradis, kaj maltrankviligitaj mevoj kriadis super Dvino.

Silvestro Petroviĉ en peruko kun harligo, en nova Preobraĵenska kaftano, strikte zonita per skarpo, en mantelo kaj trikorna ĉapelo, en blankaj gantoj, kun spado, kun mallonga lorno en la mano, eliris el sia domo, pririgardis la jam

malpleniĝintan fortresan ekzercoplacon, kriis en la vestiblon:

— Manjo, mi la tabaksaketon forgesis, alportu...

Manjo alportis la tabaksaketon, pipon, tindron, fajroŝtonon, fajrilon, demandis rapide, flustre:

— Ĉu ni adiaŭos dume?

Li firme kunpremis ŝian manon, respondis same flustre:

— Kiam bombardado komenciĝos, la infanojn — en la kelon. Dume ili en la domo sidu, sur la placon eliri ne necesas...

Kaj li eksilentis.

— Kia silento! — diris Manjo, fiksaŭskultante. — Nur solaj mevoj krias. Eble, ili jam vidas la svedojn?

Silvestro Petroviĉ vokis avinon Eŭdoĥa-n, Taisja-n:

— Jen kio, sinjoroj volontuloj, iru sub la muron. Tie por vi estos multe pli oportune. Kontraŭ kuglegoj estas ŝtona alero, neniu kuglego trabatos, da loko estas multe, se iu soldato estos vundita — li al vi venos, trovos.

Li vokis kurantan sur la placo Jegorĉjon, ordonis:

— Vi, Jegoro, ordonu elruli da vodko du aŭ tri bareletojn, la avino al homoj donadu, vodko por vundito estas sankta afero. Kaj al mia Manjo malpermesu disponi, ŝi estas tro malavara, ĉion antaŭ la komenco de la batalo disdonos...

Avino Eŭdoĥa riverencis, Jegorĉjo kure alportis sub la fortresan muron korbon kun pocioj, kun ursa ŝmiraĵo, kun odorantaj herboj. Taisja alportis botelon kun avina tizano, Manjo ekkuris por tolo por pansaĵoj, por kovriloj, por fojnaj

matracoj por vunditoj. Silvestro Petroviĉ postkriis al ŝi:

— Ĉion, kio estas, portu, nenion en la domo lasu. Ĉu vi aŭdas?

— Mi aŭda-as! — dum kurado respondis Manjo.

Silvestro Petroviĉ ekiris al ŝtuparo, kondukanta supren. Ĉi tie du viroj fiksiĝis kun ŝarĝo — en verga korbo ili trenis supren kuglegojn. La korbo ŝiriĝis, kroĉiĝis, la pli maljuna viro estis skoldanta la junulon, kiu estis subtenanta la korbon malsupre. Kaj subite Silvestro Petroviĉ rekonis ilin ambaŭ: la pli aĝa, kun barbeto, maldika kaj ĉifona, — tiam, vintre, sur vojo al Ĥolmogoro atakis lin, Ievlev-on. La alia, Kosmo, murdis antaŭ nelonge en la korto de la Sepurba domo la ŝteliston-intendanton. Kaj nun ili ambaŭ estas ĉi tie, ĉe sia militista afero.

La korbo finfine traiĝis. Silvestron Petroviĉ-on atingis Rezen — same en parada multekosta kaftano, razita, en pufa peruko, — deziris bonan matenon.

— Jen, ĝi estas bona! — subridis Ievlev.

Laŭ knarantaj ŝtupoj ili leviĝis sur la altan pordegan turon, ekstaris ĉe embrazuro, en kiun humide spiris Dvino. Ievlev rigardis nelonge, poste diris, transdonante la lornon al Rezen:

— Vidu, Jegoro! Ili iras!

La inĝeniero fiksis la lornon kaj tuj ekvidis blankajn kvadratojn kaj triangulojn de pufaj pro vento veloj, jardojn, mastojn, vimplojn...

— Rapide ili iras! — diris Rezen en la germana. — Sentime iras! Ili trovis piloton, damne!

— Trovis! — ree rigardante per la lorno, konsentis Ievlev.

Rezen, knarante per novaj ŝuoj, trairis la turon, elŝoviĝis en alian embrazuron, ordonis al deĵoranta kanonisto:

— Forĝistoj ardigu kuglegojn, pulvistoj metu ŝargon.

Ievlev rigardis per la lorno al Dvino, al ties grizaj akvoj, kie egalmezure balanciĝadis la interkonsentitaj kun Rjabov buoj, kvazaŭ forgesitaj ĉi tie kaj samtempe precize markantaj la limojn de la artefarita malprofundaĵo, rigardis al la Marka insulo, al kaŝiĝintaj tie kanonoj, al kanonistoj, al juna oficiro, levinta la spadon, — li mallevos, kaj ĉiuj kanonoj de lia baterio samtempe pafos al tiu loko, kie kviete balanciĝas nun la buoj kaj kie estos dronigita malamika ŝipo...

«Malfrue li levis la spadon, — pensis Silvestro Petroviĉ. — Longe li ankoraŭ atendos, la mano tute rigidiĝos».

Laboristoj, unu post alia, fleksiĝinte kuris al kapstano, sur kiun, eble, se io okazos, oni survolvos ĉenon. Ili kuradis, saltadis en kavon. El ĉi tie, de la turo, Ievlev klare vidis, kiel ili ekstaradis al la stangoj de la kapstano, prepariĝadis al sia afero. Nun nur hundo estis bojanta sur la Marka insulo, — gaja grandorela hundido pensis, ke la homoj kaŝiĝas kaj saltas en la kavon, ludante kun li. Sed el la kavo elŝoviĝis mano, la hundidon oni kaptis kaj metis en sakon, por ke ĝi ne bruu. Kaj sur la Marka insulo, same kiel en la fortreso, neniu iĝis videbla — ĉiuj kaŝiĝis. La svedo pensu, ke nenie kaj neniu atendas lin en tiu malfrua horo...

— Ferdekestro! — ne turniĝante, sciante, ke Semisadov estas ĉi tie, vokis Ievlev.

— Ĉi tie estas ferdekestro! — tuj per vigla voĉo respondis

Semisadov.

— Bonan rudriston ili havas, ĉu, ferdekestro?

— Li kuraĝe iras! — respondis Semisadov. — Tian oni ne tuj trovos...

Rezen bruligis la pipon, diris abrupte:

— Sur la flagŝipo ĉiuj kanontruoj estas malfermitaj kaj sur la brammasto signalo estas levita — al batalo pretiĝu!

— Do ni jam estas pretaj! — respondis Ievlev.

La antaŭa ŝipo de la eskadro kun skulptita el ebono figuro sur la pruo, aperis el post la Dvina kabo kaj tuj komencis kvazaŭ kreski, elŝiriĝante el vualo de nebulo kaj pluvo. De sur la turo estis videble, kiel ĉe la prua kupra kanono de la flagŝipo staras pretaj al pafado kanonistoj, kiel brilas sur ili malsekaj pro pluvo maŝkirasoj, kiel minacas al ili per pugno pruferdeka artileria oficiro. La grandega ŝipo estis iranta kliniĝinte, mara freŝa vento fajfis en ĝia ŝnuraro, centoj da soldatoj en kupraj kaskoj, kun muskedoj, fusiloj, lancoj, staris sur la pobkastelo, sur la mezferdeko, sur la pruferdeko, en malfermitajn truojn de kanonaj ferdekoj en tri vicoj rigardis tuboj de kanonoj...

— Ferdekestro! — senhaste, per certa, trankvila voĉo vokis Ievlev.

— Ĉi tie estas ferdekestro! — aŭdiĝis malantaŭ lia dorso.

— Bruligu meĉojn!

— Bruligu meĉojn! — kriis en la embrazuron Semisadov.

— Meĉoj brulas! — preskaŭ tuj respondis la deĵoranta kanonisto.

— Prepariĝu, kanonoj! — ordonis Ievlev.

La artileriistoj kroĉiĝis per la manoj al afustoj, la direktistoj malrapide movadis kojnojn, turnadis stangojn, atendis la lastan komandon. Semisadov arde spiris al la nuko de Ievlev — rigardis, kiel antaŭ la embrazuro de la turo aperas la sveda flago — la ora kruco sur blua kampo.

4. La eskadro sur Dvino

Rjabov mallaŭte diris al Jakobo:

— Pli poste venu al la stirrado. Triope estos pli facile.

Jakobo demandis:

— Ĉu la hakilo estas ĉe vi?

Rjabov kapjesis, reĝustigis sur si la arĝentan brokaĵan kaftanon, pli strikte strecis la zonon. Demĉjo per brulantaj admiraj okuloj rigardis al la rudristo.

— Jen vi okulumas! — diris Rjabov. — Pri kio vi ĝojas? Rigardu malĝoje, ĝoji estas frue...

Demĉjo ekridis, demandis:

— Kiel do malĝoje rigardi? Ne estas mi instruita, oĉjo...

— Jen, kiel vi en la pasintaj tagoj rigardis, tiel ankaŭ nun...

Li tiris Demĉjon je la nazo, je la hartufo, ekiris el la kajuto supren. Jakobo turnis sin al la admirala kuirejo. Demĉjo atingis la rudriston, duope ili eliris sur la pobkastelon. Urquhart renkontis ilin afable, kondukis al la stirrado. Rjabov malrapide pririgardis la velojn, komencis paroli, ke veloj estas malmultaj. Demĉjo rapide tradukis:

— Sinjoro piloto konsilas al sinjoro ŝipestro levi pli da

veloj, por, havante bonan venton al la pobo, per bona iro preteriri la fortreson kaj ne ricevi damaĝon...

La subadmiralo kapjesis:

— Li pravas! Ju pli rapide ni preteros la rusan citadelon — des pli baldaŭ ni finos la militiron. Sed veloj estas sufiĉaj. Eĉ irante kun tia rapido, kiel nun, ni riskas multon.

Urquhart almetis la manojn al la koro, diris dolĉe:

— *Herre* subadmiralo ne estas certa pri nia piloto, sed mi asertas, ke tian piloton mi vidis neniam.

Grafo Gyllenstierna silente rigardis al la larĝaj ŝultroj de Rjabov, al liaj polmoj, trankvile kaj certe kuŝantaj sur teniloj de la grandega stirrado. La piloto kondukis la ŝipon lerte, laŭ la tuta konduto de la rudristo estis videbla sperta maristo.

— Dvino abundas je malprofundaĵoj! — diris Gyllenstierna.

— Li konas ĉiun el ili! — respondis Urquhart.

La subadmiralo kun dubo ŝultrolevis.

Demĉjo ekparolis denove:

— Sinjoro piloto pensas, ke kun tia malgranda rapido estos malfacile sub kanonoj. Sinjoro piloto scias, ke da kanonoj estas multe en la fortreso, kaj ke estas grandaj kanonoj...

Gyllenstierna interrompis Demĉjon:

— Aldonu velojn, *herre* ŝipestro, sed la ruso sciu, ke se la ŝipo trafos malprofundaĵon, ni senigos lin je la vivo!

Rjabov malrapide, nur iomete movis la stirradon. Humida mara vento kun nehasta, plu firmiĝanta forto plenigadis la velojn, «Krono» ekiris pli rapide, post ĝi kolumne moviĝis la

eskadro. Urquhart aliris al la rudristo, frapis lian ŝultron, diris:

— Granda Ivano estas la plej bona piloto el ĉiuj, kiujn mi konas. Granda Ivano amikiĝu kun la olda ŝipestro, kaj lia vivo iĝos bonega...

La rudristo subridis, respondis:

— Do kial vi min en la ĉenkesto tenas, sinjoro ŝipestro...

— Sed ĉi tie estis granda batalo! — ekkriis Urquhart. — Vin ja oni povis mortigi, Granda Ivano!

Rjabov, ne respondante, movis la stirradon, kun singardo ĉirkaŭirante malprofundaĵojn. Matrosoj transdonadis sur la pobkastelo vortojn de la ŝipa observanto:'

— Ĉe la baborda pruo estas droninta barko, *herre* ferdekestro!

— Ĉe la baborda pruo estas droninta barko, *herre* leŭtenanto!

— Ĉe la baborda pruo estas droninta barko, *herre* ŝipestro!

Demĉjo tradukis:

— Barko droninta estas maldekstre antaŭ la nazo!

— Kien ne necesas — ni ne trafos! — respondis Rjabov.

La ŝipo iris rapide, pretere en pluva vualo kuradis konataj herbokampoj, marĉetoj, vilaĝoj, sur holmetoj — kapeloj, krucoj, metitaj laŭ voto de pomoroj, lignaj malnovaj, muskokovritaj preĝejoj. Rjabov, mallarĝiginte la okulojn, rigardis antaŭen, liaj fortikaj manoj kun trankvila forto tenis tenilojn de la stirrado, Demĉjo staris apude, proksime, same rigardis antaŭen.

— Ĉu vi timas? — mallaŭte demandis Rjabov.

— Ne, mi ne timas!

Li silentis iom, diris kun mallonga suspiro:

— Krikov-on mi bedaŭras, Atanazion Petroviĉ-on, oĉjo! Ĉiam mi pri li pensas...

— Per bedaŭro oni maron ne trairas! — amare respondis Rjabov. — Bedaŭri ne estas fari aferon. Estas facile...

Sur la pruo la observanto batis malgrandan sonorilon, alarme kriis:

— Rekte antaŭ la pruo malkovriĝas la eksteraj turoj de la fortreso!

En la pobkastelo oni transdonis:

— Rekte antaŭ la pruo estas la eksteraj turoj de la fortreso, *herre* leŭtenanto!

— Rekte antaŭ la pruo estas la eksteraj turoj de la fortreso, *herre* ŝipestro!

— Nu, bruas! — diris Rjabov. — Ja ni mem vidas...

Sur la pobkastelo, sur la kanonaj ferdekoj, sur la pruferdeko tamburoj rule batis signalon «al batalo!» La ferdekaj oficiroj kunpremis per la dentoj la fajfilojn. La kanonistoj almetiĝis al la malfermitaj paftruoj. Rjabov, mallarĝigante la okulojn, akre rigardis antaŭen, fiksrigardadis la turojn, la fortresajn remparojn, la malaltan, firme fermitan pordegon, la krenelajn murojn, grizajn ŝiritajn nubojn super la fortresa sonorilturo...

— Meĉistoj! Bruligi meĉojn! — ordonis la subadmiralo.

La ferdekaj oficiroj stride ekfajfis per la fajfiloj, la artileriaj

helpantoj levis kuglegojn, preparigante meti novajn post la pafo. Gyllenstierna elprenis el la poŝo tukon. En tiu momento al li de malantaŭe aliris Jakobo kun pleto, riverencis. Gyllenstierna tremeris. Jakobo diris ĝentile:

— Kafo por *herre* subadmiralo...

— Al diablo! — bruske respondis Gyllenstierna.

Ankoraŭ foje batis la sonorilo, en la pobkastelo oni transdonis:

— Rekte antaŭ la pruo malkovriĝis la tuta fortreso, *herre* leŭtenanto!

— Rekte antaŭ la pruo malkovriĝis la tuta fortreso, *herre* ŝipestro!

La ŝipo estis iranta al la fortreso. Gyllenstierna atendis. Ankoraŭ nemulte — kaj li svingos la tukon. Tiam la tuta ŝipflanko pafos per ĉiuj kanonoj — de la plej malpezaj sur la supra ferdeko ĝis la plej pezaj sur la malsupra kanonferdeko.

Ĉapitro oka

Ne por alta princo Vladimiro,
Kaj ne por princino Eŭpraksia,
Sed por kara tero nia rusa,
Por vidvinoj, orfoj, malriĉuloj.

Epika kanto

1. La heroaĵo

Rekte antaŭ la pruo de la flagŝipa «Krono» malkovriĝis la tuta fortreso. Ĝi iĝis nun alia, ol tiam, kiam la rudristo gastis ĉe Silvestro Petroviĉ: nun eĉ unu homo ne estis videbla sur ĝiaj batalaj turoj kaj remparoj, eĉ unu sono ne venadis el tie, kie tiel antaŭ nelonge dum tago kaj nokto staris senĉesa tondrado de pezaj kaj grandaj laboroj. Eblis pensi, ke tie oni plu dormas, kaj por unu momento Rjabov ektimis: ĉu vere ili ne estas pretaj? Ĉu ili ne vidas, ne aŭdas, kia venas malfeliĉo, per kia ruinigo minacas al la urbo la sveda eskadro, kiom da dungitoj en kaskoj kaj kirasoj staras sur la pobkasteloj de la ŝipoj, kiom da kanonoj rigardas el la paftruoj, kiom da avidaj okuloj rigardas la bordojn de Dvino, serĉante, kie rabi, kion bruligi, kiun murdi?

Sed la atenta rigardo de la rudristo tuj rimarkis, ke iu moviĝis kaj kaŝiĝis sur turo de la fortreso, kaj laŭ tio, kiel rapide glitis tie la homo, Rjabov komprenis: ili atendas, ili estas pretaj, akceptos la latronon kiel necesas, komencos ĝustatempe, ne malfruos. Nun estas lia vico, nun venis la tempo por lia laboro. Kaj en unu mallonga momento li prepariĝis — per rigardo li rimarkis la buojn, markantajn la malprofundaĵon, pli

forte apogiĝis per la piedoj sur la peĉitaj tabuloj de la ferdeko, pli firme metis la polmojn sur la tenilojn de la stirrado.

Demĉjo staris malantaŭe, ĉe lia maldekstra ŝultro, tradukadis, se necesis ion traduki, Jakobo alportadis al la subadmiralo jen kafon, jen plenigitan per tabako pipon, jen kruĉeton da varmega punĉo. Humida vento fajfadis en la ŝnuraro de la flagŝipo, pezaj pluvaj gutoj flugadis al la vizaĝo. La fortreso plu proksimiĝadis, plu kreskis, ĝiaj minacaj severaj turoj kaj remparoj kvazaŭ kuris renkonten al la ŝipo.

— Iru vi prefere de ĉi tie al la rando! — diris Rjabov al Demĉjo. — Vi ne ĝiskuros, kiam venos la tempo.

— Sed kiu tradukos por vi, oĉjo? — demandis Demĉjo. — Ne povas mi foriri, ili tuj komprenos...

— Mi diras, foriru! — ordonis Rjabov.

Sed Demĉjo ne foriris, restis stari ĉe la maldekstra ŝultro de la rudristo, malobeis preskaŭ la unuan fojon dum la vivo, rigardis antaŭen — al la turoj kaj remparoj de la fortreso, al la buoj, kiuj ĉiam pli rimarkeble balanciĝadis sur la griza akvo. Jam eblis distingi vergojn, per kiuj ili estis ligitaj, kanabajn ŝnurojn, per kiuj ili estis kuntiritaj.

— Ho! — prononcis Urquhart. — La moskvianoj en hasto ne forigis buojn de la ŝanelo. Des pli bone, diablo prenu, des pli bone! Ĉi tie necesas direkti nin pli maldekstre, ĉu?

Demĉjo tradukis, Rjabov respondis, ke li ĝuste tiel iros. Li iomete movis la tenilojn de la stirrado, «Krono» iomete kliniĝis, la vento ekfajfis pli laŭte.

— Oĉjo, — flustre demandis Demĉjo, — sed, eble, Atanazio Petroviĉ foriris viva? Iu unu foriris...

— Mortigis oni la kapitanon! — respondis Rjabov. — Ne povis li foriri. Ĉu oficiro povus foriri kaj forlasi soldatojn? Ne, ne tia li estis homo...

Nun jam nelonge restis ĝis la buoj, kaj Rjabov, fiksrigardante ilin, larĝe, per plena brusto suspiris, fine prepariĝante kaj konformiĝante al tio, kion li devis plenumi. Forta ruĝo aperis sur liaj vangoj, falto kuŝiĝis inter la brovoj, streĉiĝis kaj pufiĝis muskoloj sub la maldika brokaĵo de la multekosta kaftano.

La pobo de «Krono» ruliĝis dekstren, la pruo iris al la buoj.

Lastfoje la rudristo ĵetis rigardon al la turoj de la fortreso kaj jam ne plu deŝiradis la helan kaj streĉitan rigardon disde la vojo, laŭ kiu iris la ŝipo.

Rjabov pri nenio pensis en tiuj lastaj sekundoj, nenion rememoradis, nenion adiaŭadis. Eĉ unu penson pri proksima kaj probabla pereo li ne allasis al si. Li sciis firme, ke li estos viva, kaj maltrankvilis nur pri Demĉjo kaj pri sia nova amiko, kiuj, kiel al li ŝajnis, povis ne sukcesi fari tion, kion necesis. Kaj, rigardante antaŭen, li diris al ili ambaŭ karese kaj kuraĝige:

— Nun, fraĉjoj, estas nelonge. Nun tenu vin!

— Ni tenas! — per rompiĝanta pro admiro voĉo respondis Demĉjo.

Liaj vangoj ardis, la okuloj sendeŝire observis la buojn. Jakobo same rigardis al la buoj, firme kunpremante tranĉilon sub la kaftano. Li estis pli pala, ol ĉiam, pli diskreta, ol kutime, kaj fojfoje ĵetadis rigardojn al flankoj, prepariĝante al batalo, kiu devis okazi ĉi tie, ĉe la stirrado.

— Nu, oĉjo! — per arda flustro malantaŭ la dorso de Rjabov diris Demĉjo. — Kun Dio!

En tiu sekundo Rjabov, kunpreminte la dentojn, lastfoje iomete movis la stirradon. Preskaŭ tuj longa grinco elŝiriĝis, ŝajne, de la fundo mem de Dvino, la pruo de «Krono» malrapide leviĝis, la pobo komencis subfali, kaj longa seninterrompa kriego de malespero kaj furiozo ruliĝis tra la kanonaj ferdekoj, la pobkastelo, la pobferdeko kaj la tuta ŝipo.

La rudristo ellasis la tenilojn de la stirrado.

Ĉi tie jam ne estis, kion fari — la flagŝipo estis firme sidanta sur la malprofundaĵo.

En hurlado de voĉoj, tute proksime, surdige ekklakis pistolaj pafoj, la rudristo kliniĝis, komprenis — oni pafas al li. Tute proksime brilis pinto de spado, li batis per la hakilo, la homo, kiu volis mortpiki lin, falis. Demĉjo kaj Jakobo estis rebatantaj malantaŭ la dorso de Rjabov, kaj li ŝirmadis ilin ambaŭ kaj hakadis per la hakilo ĉiujn, kiuj ĵetiĝadis al li, tiel trafe kaj kun tia teruriga forto, ke ĉirkaŭe baldaŭ kreiĝis malpleno, kaj nur pafoj tondris ĉiam pli ofte kaj kolere.

Nek Rjabov, nek Demĉjo, nek Jakobo vidis, kiel la dua ŝipo de la eskadro, ne sukcesinte eviti, trafis en la altan skulptitan pobon de «Krono», ili nur sentis teruran puŝon kaj ankoraŭ foje aŭdis kriegojn de la anaro de la flagŝipo, longan, jam ne ĉesantan krion kaj post ĝi akordan, surdigan, basan muĝon de kanonoj: samtempe batis la kanonoj de la Novdvina citadelo kaj la baterio de la Marka insulo.

Rebatante per la hakilo, Rjabov ne vidis, kiel oni forpremis de li Jakobon, kiel falis Demĉjo. Sed kiam ardigita kuglego

splitis la ferdekan kovraĵon kaj dispelis la svedojn, la rudristo retrorigardis kaj komprenis, ke Demĉjo estas vundita. Alte levinte en la dekstra mano la hakilon, la rudristo revenis kaj ektrenis kun si Metrion al la rando, por salti kun li en la akvon, sed subite komprenis, ke iri li ne povas, povas nur rampi. Sed ankaŭ rampi ne eblis, ĉar oni lin frakasus, kaj li plu iris kaj iris, kovrita de sango, kun la hakilo en la mano, trenante post si Metrion. Ĉe la rando mem al li helpis Jakobo, kiu same estis vundita kaj, larĝe malfermante la buŝon, neniel povis enspiri.

— Li tuj saltos! — diris Rjabov al Jakobo pri Demĉjo. — Li estas en ordo, batiĝis, eble, iomete. Mi kun li naĝos, kaj vi same naĝu kun ni...

Ree fajfis kuglego kaj enpikiĝis en la ferdekon.

Jakobo trenis Demĉjon al brecо en la ŝiprando. Demĉjo laŭte ĝemis, Rjabov ordonis:

— Saltu, ne atendu! Saltu!

Ili saltis duope, kaj la rudristo saltis post ili. Jam en la akvo li batiĝis je io per la kapo, kaj malvarma griza Dvino fermiĝis super li.

2. Sur la fortresa turo

— Pafu! — ordonis Ievlev.

— Pafu! — kriis Semisadov.

— Pafu! — kriis Teodozo Forĝisto al siaj kanonistoj.

Kaj tuj tremeris la pordega turo, tremeris la remparoj, kaj flava flamo elŝiriĝis el la kanonaj tuboj. Kuglegoj kun fajfo kaj muĝo enpikiĝadis en la ferdekon de la flagŝipo, trabatadis la flankojn de la fregato, rompadis ferdekajn superkonstruaĵojn,

splitadis rostrojn, savboatojn, mastojn. Pulva fumo, brulodoro, fulgo momente, kvazaŭ nubo, kovris la fortreson, kaj en tiu nubo kanonistoj purigadis la kanontubojn, enruladis kuglegojn, direktadis, pafadis. De kanono al kanono kuradis nigra Teodozo Forĝisto, korektadis direkton, larĝe malfermadis la buŝon, atendis pafon. Kaj kelkajn minutojn post la komenco de la batalo al la homoj ŝajnis, ke la batalo iras jam delonge, ke estas nenio speciale timinda en tiu afero, ke la svedo ne rebatos kaj baldaŭ al li estos fino.

— Viktorio, sinjoro kapitan-komodoro! — kriis Rezen. — Ili ne plu havas kion fari, krom kapitulaci. Rigardu!

Elŝovinte sin el la embrazuro ĝis la zono, li per la mano almontris al Ievlev la leviĝintan pruon de la flagŝipo, la fregaton, kiu iris kolumne post «Krono» kaj trafis ties pobon. De la randoj de la fregato, de la pruferdeko, kriante, dispuŝante unu la alian, estis saltantaj svedoj; iuj penis mallevi savboaton, aliaj grimpis laŭ vantoj supren, triaj preĝis, etendante la manojn al la ĉielo.

— Al ili estas fino! — diris Rezen. — Ili surgrundiĝis. Kiel tio okazis, ke ili surgrundiĝis?

— Ilin surgrundigis rudristo Ivano Rjabov! — diris Ievlev. — Estis plenumita granda heroaĵo, Jegoro. Kaj koncerne tion, ke ni povas celebri venkon, — oni rapide diras, sed ne baldaŭ faras. Ne du ŝipoj estas en ilia eskadro, kaj ankoraŭ ne nun ili levos blankan flagon. Venkon necesas akiri, kaj ni nemalmulte laboros, ĝis ĝi trafos en niajn manojn. Ni iru al la kanonistoj!

La inĝeniero almontris siajn orelojn — ne aŭdas mi.

— Al la kanonistoj ni iru! — kriis Ievlev.

Ili eliris sur la eksteran remparon, kie laboradis la kanonistoj, per tenajloj metadis en kanonajn faŭkojn ardigitajn ŝtonajn kuglegojn, priverŝadis la siblantan kupron de la tuboj per vinagro, direktadis, enpremadis meĉojn en fuzeojn...

La svedoj ankoraŭ ne respondis.

3. La batalo

— Blankan flagon! — kriis Urquhart. — Blankan flagon, *herre* subadmiralo! Ni devas levi blankan flagon. Ekvidinte la blankan flagon, ili ĉesigos pafadon, kaj ni saviĝos, *herre* subadmiralo! Alie pereo, nur pereo atendas nin...

Gyllenstierna kliniĝis, petis:

— Ripetu, mi nenion aŭdas.

— Blankan flagon! — kriis Urquhart.

Gyllenstierna subridis per la bluaj lipoj, levis pistolon, pafis demalsupre supren en la dikan vizaĝon de la ŝipestro de «Krono». Urquhart falis dorsaltere, la kupra kasko ruliĝis sur la ferdeko...

Ĉirkaŭe oni plu pafadis per pistoloj, serĉadis la rusan piloton, kvazaŭ tio povus helpi almenaŭ al io. Gyllenstierna faris kelkajn paŝojn sur la kovraĵo de la pobferdeko, puŝis la tubon de la senŝarga pistolo en la makzelon de tremeganta Plomgren, batis la artileriiston per la piedo, kriis, rompante la voĉon:

— Malpura poltrono! Staru rekte, kiam kun vi parolas admiralo!

Plomgren globigis la okulojn, rektiĝis. La subadmiralo rigardis al li kun abomeno, — li mem en nenio ŝanĝiĝis, grafo

Gyllenstierna: la sama trankvila flava vizaĝo, la samaj kartilagaj oreloj, la samaj kafkoloraj okuloj.

— Ekzekutiston al mi!

— Ekzekutiston al grafo subadmiralo!

— Ekzekutiston, kaj pli baldaŭ!

Svante Bagge troviĝis tuj.

— Dekduon da knaboj prenu por helpo! — ordonis Gyllenstierna.

Dek du uloj viciĝis post la dorso de Bagge.

— Malkuraĝulojn kaj perfidulojn mortigi sur la loko! — maĉinte per la lipoj, ordonis Gyllenstierna. — Ni devas gajni la batalon. La moskvianoj ne povas venki eskadron de lia moŝto reĝo de la svedoj, vandaloj kaj gotoj. Ni havas kanonojn, kuglegojn, artileriistojn....

Kaj la subadmiralo vokis per sia raŭka, maljunula, sed tute trankvila voĉo:

— Leŭtenanto Plomgren!

— Leŭtenanto Plomgren estas ĉi tie, *herre* subadmiralo!

Gyllenstierna, plu maĉante per la lipoj, ĉirkaŭrigardis, pensis kaj ordonis plu trankvile kaj klare:

— Kanonojn de la tribordo al batalo! Kanonojn de la babordo al batalo! Klarionistoj, «Gloron al la reĝo!»

Du restintaj vivaj klarionistoj, apenaŭ tenante sin sur la kliniĝinta ferdeko, almetis la klarionojn al la lipoj. Matrosoj, pelataj per skurĝoj de ferdekestroj, jam estis priverŝantaj la bruletantan ferdekon, per rompostangoj disbatantaj bruligitajn

de kuglego baŭojn de la ĉefmasto, estingantaj fajfantan flamon sur la pobferdeko. La ŝipatakaj soldatoj jam estis baskuligantaj brakojn de pumpilo...

Sur la supra ferdeko malakorde ektondris malpezaj kanonoj, sur la kanona ferdeko batis unu — peza. La tuta korpo de la ŝipo skuiĝis: nun batadis kanonoj kaj de la babordo kaj de la tribordo — al la fortreso kaj al la baterio de la Marka insulo. Rusaj kuglegoj kun muĝo enflugadis en kanonajn truojn, unu batis al piramido de pulvujoj, blanka flamo brulvundis samtempe kelkajn artileriistojn, alia kuglego trafis al artileriaj helpantoj, kiuj estis puŝantaj afuston. Malgraŭ penoj de incendiaj pumpiloj, senĉese — jen tie, jen ĉi tie — aperadis flamo.

Leŭtenanto Plomgren, tenante la spadon en la maldekstra mano, ĵetiĝadis sur kanonaj ferdekoj, kriadis en orelojn al surdiĝintaj ferdekaj oficiroj:

— Mitrajlon! Al la remparoj — per mitrajlo! Ĉien — mitrajlon! Mi murdos!.. Prepariĝu!

La ferdekaj oficiroj kun timo rigardis al sia leŭtenanto — ĉu li ne freneziĝis...

Gyllenstierna, senmove starante sur la pobferdeko, ordonis:

— Al elŝipiĝo!

La klarionistoj levis la klarionojn, la tamburisto timigite batis ruladon. La ŝipataka leŭtenanto kun vindo sur la frunto kure leviĝis sur la pobferdekon, alkuris al la subadmiralo. Gyllenstierna, almontrante la Markan insulon, ordonis:

— Vi elŝipiĝos sur la bordon kaj per ajna kosto silentigos la kanonojn.

La leŭtenanto ne komprenis, Gyllenstierna ripetis. Apude tondris du muskedaj pafoj: la uloj de Svante Bagge mortpafis kaŝiĝintan matroson. Svante Bagge mem venigis oficiron de komunikado, la subadmiralo ordonis al li transdoni sur la ceterajn ŝipojn malkontenton de la flagŝipo: la flagŝipo deziras vidi pafadon per ĉiuj kanonoj, sed ne unuopajn pafojn...

Ordonante al la oficiro de komunikado, li rigardis tien, de kie la knaboj de Svante Bagge estis akompanantaj la soldatojn de la ŝipataka grupo sur la insulon. Ĉiun, kiu malrapidigadis paŝojn, ili detrenadis de la ŝtuparo kaj mortigadis aŭ per bato de tranĉilo, aŭ per pafo.

Iom post iom ĉio reordiĝadis, kvankam kuglegoj de rusaj kanonoj plu detruadis la ŝipojn. Nun la eskadro komencis pafi. Kaj sur «Krono» kaj sur aliaj fregatoj kaj jaĥtoj estis ankoraŭ nemalmulte da kanonoj kaj lertaj artileriistoj. Unue svedaj kuglegoj trafadis aŭ en Dvinon, aŭ en la korton de la fortreso, sed poste, kiam la svedoj trovis ĝustan direkton, la kuglegoj ĉiam pli ofte semis morton kaj detruon sur la remparoj kaj en la batalaj turoj de la citadelo. Jam dufoje en la rusa fortreso komenciĝis incendioj, kaj nigra densa fumo leviĝis al la ĉielo, sed la rusoj, evidente, estingis la fajron. Jam peze tondris eksplodo en la citadelo — probable, kuglego trafis en pulvan kelon. Jam kelkaj mortigitaj rusaj kanonistoj falis de la muro en la grizajn Dvinajn akvojn. Kaj sur la Marka insulo ektondris finfine muskedaj kaj fusilaj pafoj — la batalgrupo, evidente, estis faranta sian aferon. Venis tempo prepari atakan grupon en la fortreson, kaj Gyllenstierna jam deziris fari ordonon pri tio, kiam subite Svante Bagge altrenis al li sur la pobferdekon soldaton el tiuj, kiuj estis sur la Marka insulo. La dentoj de la

soldato klakadis, sur la vizaĝo fluis sango; stumblante, li rakontis, ke sur la insulo, krom kanonistoj, estas multaj barbaj moskvianoj-kampuloj kun hakiloj kaj palisoj. Tuj kiam la ataka grupo surpaŝis la bordon de la insulo, tiuj kampuloj elsaltis el siaj kavoj kaj batis al la soldatoj kun tia forto, ke ili povis fari nur du salvojn kaj estis frakasitaj. Multaj falis sur la genuojn, kapitulacis, multaj estis mortigitaj, kelkaj penis saviĝi per fuĝo, sed la moskvianoj atingadis ilin kaj senkompate mortigadis...

— Poltrono! — diris Gyllenstierna kaj forturniĝis.

La soldato plorkriis, Svante Bagge ordonis al siaj knaboj fini lin.

4. Demĉjo

Silentulo demetis sian kitelon, eksidis sur arbostumpon, longe, avide trinkis akvon. Kampuloj estis interparolantaj per lacaj voĉoj, unu — fortega, kolera — balancadis la kapon, turnadis en la manoj hakilon: kia bona hakilo estis; sed nun sur la pinto estas breĉo — difektiĝis sur sveda kiraso.

— Du muskedoj anstataŭ hakilo, sed al li plu estas malmulte! — diris Silentulo.

La kampulo bruske respondis:

— Por kia diablo mi bezonas muskedojn? Ĉu mi per ili ĉarpentos? Prenu jen ambaŭ, donu anstataŭ ili hakilon...

Aliaj laboruloj ekridis: kia ruza — donu al li hakilon kontraŭ muskedoj. Ili komencis paroli, kiom kostas nun en bazaro hakiloj, kiom kostas muskedoj, tranĉiloj. Rezultis tiel, ke muskedo estas por nenio taŭga aĵo: se oni kaptos kun muskedo — forprenos, kaj ankoraŭ knutos.

Post arboj, post faligitaj arbotrunkoj estis ĝemantaj vunditaj svedoj. Kvankam ankoraŭ estis pluveto, sed la ĉielo iuloke estis blua. Plu de Dvino venadis humido, acida pulva odoro. Peze, ofte, rule tondris la fortresaj kanonoj, la svedoj senĉese pafadis el ĉiuj ŝipoj. La baterio sur la Marka insulo silentis, la kanonistoj estis purigantaj la tubojn, malvarmigantaj la ardiĝintan kupron, lunĉantaj.

— Kaĉon ili manĝas! — envieme diris kampulo kun makulo en la okulo. — Grasan kaĉon, viandan, kaj ankoraŭ kun butero, je Dio tiel...

— Kiuj?

— La kanonistoj. Ĝissate, je Dio!

Silentulo ĉerpis el barelo per sitelo, donis al junulo, ordonis:

— Iru, portu al la svedoj trinki.

La junulo ne prenis la sitelon, lia vizaĝo iĝis obstina.

— Ĉu mi al vi diras, aŭ al kiu? — demandis Silentulo.

La junulo leviĝis, sendezire prenis la tenilon de la sitelo per la granda mano. El la arbaro, el post arboj brigadestro de terfosistoj maljunulo Nikandro elirigis iun — maldikan, malfortan, — svingis la manon, kriis:

— He, helpu...

Silentulo ekiris renkonten, subkaptis Demĉjon ĉe la alia flanko, rigardis en lian bluan vizaĝon, demandis:

— Ĉu el akvo?

— Vundita li estas! — diris la brigadestro. — Neniel per la piedoj iri povas. Kaj la kapo vidu kiel... Ne teniĝas...

Fiskrigardinte Demĉjon, Silentulo rememoris la Solombalan ŝipkonstruejon, Rjabov-on, la nigraokulan laman junulon, kiun prizorgadis la rudristo.

— Interpretisto li estas, — diris Silentulo, — kun rudristo, kun Rjabov sur fremdlandajn ŝipojn iradis. Kiel do tio okazis, ke nun li el akvo eliĝis vundita?

Kaj, trafita de diveno, rememorinte subite, kiel la antaŭa sveda ŝipo surgrundiĝis, kriis:

— Ĉu vi aŭdas, Metrio? Ĉu vi kun li estis, kun la rudristo? Sur la latrona ŝipo? Do parolu vi, pro Dio, ne silentu! La rudristo kie estas?

Demĉjo silentis, faladis flanken, lia vizaĝo tute bluiĝis.

— Li mortas! — diris la viro kun okulmakulo. — Kuŝigu lin ĉi tien, sur pajlon, — estas pli mole morti...

Silentulo zorgeme mallevis Demĉjon sur la pajlon, eksidis apud li, kune kun brigadestro Nikandro komencis demeti de li la mallongan kaftaneton, la ĉemizon — ĉion pezan, malsekan. La brigadestro kun suspiro turnis la kapon — nu, ricevis la junulo!

— Tuta batita! — diris tiu kampulo, kiu antaŭ nelonge insultis pro la hakilo. — Vidu, kiom vundita. Kaj kiel li ankoraŭ vivas...

— Estu ostoj, karno kreskos! — diris alia kampulo, ŝirante per la dentoj ĉifonaĵojn por pansado.

Ree en la baterio de la Marka insulo ektondris kanonoj. Demĉjo subite malfermis la okulojn, liaj arkaj okulharoj tremeris, li ekspiris ofte, demandis:

— Kie oni pafas? Kies kanonoj?

— Niaj, kara, niaj, — karese, flustre respondis Silentulo, — niaj, la baterio pafas...

— Kaj oĉjo, oĉjo kie estas? — timigite, penante leviĝi, demandis Demĉjo. — Oĉjo kie estas, Ivano Sabateiĉ?

— Ĉu li la ŝipon surgrundigis? — per demando respondis Silentulo.

— Li... Mi kaj li en akvon, en Dvinon falis! — kun peno movante la lipojn, diris Demĉjo. — Sed ĉu tie ĉi li ne estas?.. Mi naĝis ankoraŭ, sed li ne estas kaj ne estas...

Li skuiĝis per tuta sia maldika korpo, en la brusto aŭdiĝis stertoro. Silentulo per la mano subtenis lian kapon. Demĉjo ĉiam movadis la okulojn, kvazaŭ serĉante Rjabov-on, poste longe, spasme suspriris kaj ekflustris, balbutante kaj konfuziĝante:

— La ŝipon ni firme surgrundigis, ne eliros ili, ne, nun jam neniel eliros, kion ajn ili faru... Kaj Krikov-on oni same mortigis, Atanazion Petroviĉ-on. Multaj tie estis mortigitaj, mi vidis, kiel apud la skansoj en Dvinon oni ĵetadis dragonojn kaj doganistojn niajn... Multajn ili mortigis, latronoj, sed vidu, nun ankaŭ al ili la fino venas...

Li ree komencis rigardi al flankoj kaj, rimarkinte faligitajn en amason svedajn kaskojn, muskedojn, fusilojn, demandis:

— Ĉu estis batalo?

— Estis, Metrio, estis, negranda, sed estis.

— Ĉu rebatis?

— Rebatis! — diris Silentulo. — Kial ne rebati! Iun

mortigis, iun ligis, iun instruis — aŭdu, ili oĥas...

— Trinki... — petis Demĉjo.

Silentulo submetis sub la kapon de Demĉjo sian kitelon, ordonis kuŝi kviete, ekiris al la kaptitaj svedoj. Ekvidinte ruson, la svedoj ekbabilis ion en sia lingvo, komencis pri io plendi aŭ ion peti — Silentulo ne komprenis. Li aliradis al ĉiu, pririgardadis, turnante antaŭ si la kaptiton, — serĉis, finfine trovis — platbotelon. La oficiro timigite elŝiris ĝin el la rimena maŝo, kun flatema vizaĝo, riverencante, eltiris la ŝtopilon. Silentulo ne trinkis, revenis al Demĉjo, malleviĝis apud li sur la genuojn, disigis liajn forte kunpremitajn dentojn. La vodko verŝiĝis pretere, la viro kun okulmakulo ĉagrene diris:

— Verŝu, ne domaĝu!

La vizaĝo de Demĉjo nun griziĝis, la okuloj montris la blankojn el sub la nigraj okulharoj. Silentulo malsekigis ĉifonon, metis sur la frunton de Demĉjo. Tiu ree skuiĝis tuta kaj kvietiĝis. Silentulo senmove rigardis al li. En folioj de arboj trasusuris vento, aperis la suno, ekludis sur malsekaj trunkoj de betuloj, en gutoj de nesekiĝinta pluvo. Estis aŭdeble, kiel oficiro en la baterio krias per rompita voĉo:

— Kanonoj prepariĝu! Meĉojn bruligu! Pafu!

— Li forpasas! — diris Silentulo, prenante la manon de Metrio per siaj malmolaj polmoj.

La viroj demetis la ĉapojn. La okuloj de Demĉjo malrapide malfermiĝis, li suspiris, vokis:

— Oĉjo, ha, oĉjo!

Kaj plendis:

— Kial li ne venas?..

La kanonoj ree skuis la teron de la malgranda Marka insulo. Silentulo firme kunpremis la malvarmiĝantajn manojn de Demĉjo, konsolis kiel povis:

— Atendu, baldaŭ venos la oĉjo. Troviĝos.

Sed Demĉjo jam ne aŭdis, kaj Silentulo, kuntirinte la brovojn, fermis liajn okulojn. La viroj silente surmetis la ĉapojn. La viro kun okulmakulo, demetante de lignofajro gispoton, en kiu estis bolanta supo, vokis:

— Ĉu ni tagmanĝu? Ne frue, mi pensas...

La aliaj viŝis kulerojn, krucosignis sin. Silentulo plu sidis kaj sidis apud la korpo de Demĉjo, pensadis. Poste diris:

— Mi jen kiel rezonas: serĉi ni devas Rjabov-on, la rudriston. Eble, li kuŝas ie en salikaro. Moviĝu, brigado, leviĝu...

— Jen ni tagmanĝos, kaj tiam leviĝos, — diris la viro kun okulmakulo. — Dum kiom da tempo varman manĝon ni ne havis. Eksidu, Paŭlo Stefanoviĉ, prenu kuleron...

Silentulo aliris pli proksime al la ceteraj viroj, eksidis kaŭre, ĉerpis la supon...

5. La brulŝipoj ekiris

La bela festa kaftano de Rezen jam antaŭ longe ŝiriĝis kaj makuliĝis per sango de vunditoj, jam antaŭ longe la inĝeniero deĵetis ĝin en batala febro, turnante kune kun Teodozo Forĝisto pezajn kanonojn kaj mem enpremante meĉojn en fuzeojn. Jam iĝis vundita Silvestro Petroviĉ, avino Eŭdoĥa pansis lian kruron, kaj ree la kapitan-komodoro revenis sur sian pordegan

turon, bombarditan per svedaj kuglegoj. Jam dufoje oni estingis incendiojn en la fortreso. De la remparo oni jam forportis laŭ knarantaj ŝtuparoj malsupren multajn mortigitajn kanonistojn kaj kuŝigis apude sur pavimŝtonoj de la ekzercoplaco, kaj svedaj kuglegoj, ŝrikante, daŭrigadis sian aferon: jen enpikiĝadis en fortresajn remparojn kaj murojn, jen faladis sur tegmentojn de soldataj kaj oficiraj domoj, jen disŝiradis je pecoj kanonistojn, soldatojn, matrosojn.

Jam dum dekdu horoj seninterrompe plu daŭris la batalo.

La fortresa maljuna popeto estis faranta funebran diservon. Kelkaj maljunulinoj staris apud siaj mortigitaj edzoj-nutrantoj, tenis en la manoj maldikajn kandelojn, kunkantis al la popo. Samloke apude, en fornoj, forĝistoj kun kaviĝintaj okuloj, kun vizaĝoj, kovritaj de fulgo, estis ardigantaj ŝtonajn kuglegojn, tiradis ĉenon al la remparo — al la kanonistoj, la ardigitan kuglegon la kanonistoj levadis en fera korbo, ĝi ŝprucigadis fajrerojn, sibladis, kiam oni ĝin enruladis en la kanonan tubon, malvarmigitan per vinagro kaj viŝitan per skovelo. Same per ĉenoj oni levadis supren gisajn kaj ferajn kuglegojn. Fiŝistaj edzinoj, dvinaninoj, venintaj kun siaj edzoj konstrui la fortreson, serĉadis en la korto, trans la domoj, trans amasigitaj tabuloj kaj ŝotro svedajn kuglegojn. Ĉiu virino en la mano havis kelkajn rondojn, per tiuj rondoj ili mezuradis amplekson de kuglego. Okazadis, ke ĝi konvenis, — tiam infanoj kun ŝriko trenadis ĝin al la fortresa muro, al la forĝistoj. La forĝistoj subridadis en la barbojn, — tiele la milito ne finiĝos eterne...

En la korto, post la fortresaj keloj, virinoj kuiradis por soldatoj, kanonistoj, matrosoj, forĝistoj kaĉon kun porka lardo,

kun bovaĵo kaj kun pipro. Unu virino, dika, ruĝvanga, svingante ĉerpokuleron, kriis per forta vira voĉo:

— Kaj mi al li diras: hundaĉo, donu, mi diras, lardon. La komandanto, mi diras, ordonis. Kaj li, ŝtelisto, metis la manojn sur la flankojn kaj min moke senhonorigas. Mi al li diras: vi, mi diras, estas hundaĉo, al mi la kapitan-komodoro mem...

En la aero kun fajfo traflugis kuglego, batis en la muron de kelo. La kuiristino daŭrigis:

— Ja aŭskultu min, virinoj, aŭskultu. Mi diras...

Kaj ŝi rakontis, kiel ŝi leviĝis «en la plej ardan inferon mem», kie sinjoro Ievlev sidas, — en la turon, kaj kiel sinjoro kapitan-komodoro nomis ŝin «kara» kaj ordonis lardon por nutrado de militistoj doni nepre, kaj se la tenisto ankoraŭ obstinos, «pafi al li sur la loko per malpura kuglo»...

— Kial do vi ne pafis? — demandis alia virino, lulante sur la manoj infanon.

— Malpuran kuglon mi ne havas, tial ne pafis! — respondis la kuiristino kaj, ekstarinte sur ŝtupon, profunde mergis sian ĉerpokuleron en la grandan gisan kaldronon, kie bolis kaĉo, siblante per lardo.

Alia kuiristino alportis en tino raspitan ajlon kun cepo, demandis:

— Ĉu meti, Pelagia?

— Ĉu ne estas frue? Kiam vi metos, tiam disdoni necesas, sed ili, ŝajne, ne havas tempon, — ĝuste nun pafas...

— Ili pafados eterne! — diris tiu, kiu lulis la infanon. — Ni portos al la remparoj, ili manĝos, ne taŭgas ja kun malsata

ventro... Faru, Pelagia, verŝu, mi al mia brigado portos. Simĉjo mia, ŝajne, jam ekdormis...

Metinte la infanon sub la muron, sur benkon, ŝi prenis lignan bovlon kun du teniloj, apogis ĝin per la firma genuo kaj ordonis:

— Verŝu pli densan — por kanonistoj ja estas la kaĉo...

Pelagia kun tondro ĵetis sur tabulojn la ĉerpokuleron, prenis per la fortikaj manoj ĉerpilon sur bastono, kirlis en la kaldrono, por ke ĉiuj ricevu saman kaĉon, plenigis la bovlon ĝis la randoj kaj demandis:

— Ĉu vi sukcesos sola, Justinjo?

— Eĉ ne tiom mi portadis! — respondis Justina, prenis la bovlon, ekiris, lerte kaj bele balanciĝante dum irado, malaperis malantaŭ angulo de la kelo.

En la sama momento en la aero aŭdiĝis kvakanta, ĉiam kreskanta ŝriko, kaj kuglego, kirlinte teron apud la nudaj sunbrunaj piedoj de la virino, batiĝis al la ŝtona muro de la kelo kaj ekturniĝis tie, ŝmacante kaj siblante en flako. Justina ŝanceliĝis, sidiĝis.

La virinoj kuŝigis ŝin sur herbon, apud pado, kovris la delikatan vizaĝon per tuko... Unu rekonsciiĝis:

— Ho Dio, sankta Nikolao, la kaĉo ja malvarmiĝas. Ek, Glanjo, ni portu...

Simĉjo vekiĝis kaj komencis krii sur la benko, kuiristino Pelagia prenis lin per la dika mano, alpremis al la brusto, diris kun larmoj en la voĉo:

— Silentu, orfo, ĉit! Jen ni disdonos la kaĉon, trovos por vi

panjon, vi ankoraŭ suĉos... Silentu, infaneto, silentu...

Tenante per unu mano la orfon, per la alia lerte manipulante la ĉerpilon, Pelagia disverŝadis kaĉon por venantaj virinoj kaj, lulante la bebon, demandadis per diversaj voĉoj:

— Kaj jen mi kian fianĉon havas, virinoj, ĉu ne havas vi fianĉinon konvenan? Aj, bona estas fianĉo, aj, bela, aj, kia prodo naskiĝis! Kanonisto estos, matroso estos, oficiro estos, generalo estos, — ĉu ne bezonas vi, onklinoj?

Pli dense kaj pli grase — kun lardo kaj tripo — la kuiristino verŝis nur en unu bovlon — al Taisja por vunditaj batalistoj, kiujn kuracis avino Eŭdoĥa per siaj ŝmiraĵoj, herboj kaj tizanoj. Taisja dankis per riverenco, ekportis la bovlon tra la fortresa korto, preter brulanta tenejo, el kiu monaĥoj, priverŝante sin per akvo, por ne ekbruli, estis trenantaj sakojn kun faruno kaj grioj, salviandon en bareloj, salitan fiŝon en korboj; trenis preter la granda domo de la kapitan-komodoro, preter la fortresa foskavo, en kiu kolumne staris la brulŝipoj, pretaj al batalo. Ferdekestro Semisadov, viŝante ŝviton sur la kaviĝinta vizaĝo, frapante per la lignaĵo, lerte saltadis de unu brulŝipo sur alian, disŝutadis en kanaletoj kaj korboj pulvon, almetadis ekbruligajn tubojn. Matrosoj en trikitaj ĉapoj fiksadis sur mastoj kaj jardoj de la malnovaj, duonputrintaj velboatoj, prenitaj kiel brulŝipoj, hokojn kaj pikilojn, per kiuj la brulŝipoj devis kunkroĉiĝi kun la ŝipoj de la svedoj...

Taisja vokis Semisadov-on. Li lerte transsaltis sur la bordon, demandis, karese ridetante:

— Ĉu por vunditoj estas la kaĉo?

Taisja kapjesis. Ŝiaj okuloj rigardis fiere, ŝi kvazaŭ atendis

ion de la ferdekestro. Tiu konfuziĝis, elprenis el la poŝo pipon, komencis plenigi ĝin, alpremante tabakon per la nigriĝinta fingro. Sur la remparoj ree batis kanonoj, sur Dvino fore disflugis peza, ululanta tondro, la ferdekestro diris, fiksaŭskultante:

— Ni militas, Taisja Antipovna... Nun ni jen la brulŝipojn sendos, bruligos lin, latronon, por ke ne plu venu al ni...

Taisja plu rigardis en la okulojn de Semisadov, estis videble, ke ŝi ne aŭskultas lin. Ŝi demandis:

— Homoj diras, sinjoro ferdekestro, ke kiel rudristo ĉe ili Ivano Sabateiĉ iris. Ĉu tiel?

— Ĝuste li iris! — tuj respondis Semisadov, kvazaŭ atendis tiun demandon kaj nun ĝojis, ke povis ĝin respondi. — Ĝuste li iris, Ivano Sabateiĉ! Honoro al li, gloro por ĉiam!

Ŝi kapjesis trankvile kaj ekiris plu sur ŝtonoj, apud la foskavo. Semisadov paŝis post ŝi, ektiminte ian ŝanĝon, kiu okazis en ŝia vizaĝo, penis preni el ŝiaj manoj la pezan bovlon, sed ŝi diris, ke ĝisportos mem — ne ferdekestra afero estas porti manĝaĵon, por tio estas edzinoj kaj vidvinoj. Kaj helaj larmoj subite ŝprucis el ŝiaj okuloj. Kaj Semisadov lamis apud ŝi kaj, neniom kredante siajn vortojn, konsoladis:

— Revenos li, Taisja Antipovna! Revenos, vi kredu! Al ĉiu en la libro de la vivo estas skribite, kaj li vivos longe, li jen kiom longe vivos. Li estas en sep akvoj lavita, kun cindro boligita, droninta, sur Grumanto enterigita, per neĝoj kovrita, per frostoj frostigita, sed viva. Vi min aŭskultu, Taisja Antipovna, aŭskultu min, mi malbonan ne diros, mi mem estas ŝipano, mi scias, kia li estas — Ivano Rjabov filo de Sabateo...

Kun fajfo, kun tondro en la mezon de la korto falis unu kuglego, poste alia, alte super la remparoj ekŝrikis mitrajlo. Semisadov turnis sin reen al la brulŝipoj, kriante sur la bordo al Taisja:

— Revenos li, vi kredu! Li estas viva!

— Kiu estas viva, oĉjo? — demandis juna matroso, fiksanta hokojn sur masto de brulŝipo.

— Oĉjo, oĉjo! — en kolero mokimitis Semisadov. — Kia mi por vi estas oĉjo? Mi estas ferdekestro, sed ne oĉjo! Oblikve la hoko staras, ĉu vi ne vidas?

Desupre, de la turo ekfajfis per fajfilo Ievlev, poste kriis en paroltubon:

— Ĉu vi pretas, ferdekestro?

— Pre-etas! — respondis Semisadov.

— Eliru, bruligu ilin, latronojn!

Semisadov bruligis torĉon, komencis ŝovi flamon en ekbruligajn kornojn de la brulŝipo, ŝtopitajn per vakso. La kornoj ekbrulis hele. Al la pordego, metita super la akvo, ekkuris soldatoj kun lancoj, defaligis lignajn trabojn, levis ferajn trabojn. La pordego ekknaris. La matrosoj, premante per la brustoj hokstangojn, puŝis antaŭ si la antaŭan brulŝipon, akcelis ĝin, por ke ĝi rapide eliru sur Dvinon. Semisadov lerte saltis en malgrandan boateton, ekkondukis antaŭ si la brulŝipon al la flagŝipo «Krono». Aliaj brulŝipoj iris malantaŭe, vento blovis de la fortreso; la flamanta, fulganta, arda velboato kun pikiloj malrapide moviĝis al «Krono». Tie ekkrakis muskedaj pafoj, kugloj trabatadis la velojn de la brulŝipoj, kun hurlanta sono enpikiĝadis en sakojn kun pulvo, la pulvo ekbrulis,

ekbrulis ankaŭ la veloj. Semisadov, apoginte sin per la lignaĵo al la benko, remis al la flagŝipo, puŝante antaŭ si la flamantan brulŝipon kaj ĉiam retrorigardante, — kiel iras la aliaj, ĉu ne estas ie halto. Sed la aliaj kvar flamantaj velboatoj iris en larĝa duonrondo iomete malantaŭe. Super la brulantaj velboatoj flugis kuglegoj, svedaj kugloj flugis proksime de la ferdekestro, unu gratvundis lian brakon, alia splitis remilon. Nun li devis remi per unu remilo. Super la brulantaj veloj la ferdekestro jam vidis la mason de la baŭminta sveda ŝipo, premis ankoraŭ foje — per lastaj fortoj. La velboato per flanko batiĝis al la flanko de «Krono», la hokoj kaj pikiloj enpikiĝis en la lignon, fulganta flamo lekis la ŝelon de la ŝipo, sur ĝi ekkuris oraj fajreroj. De supre al Semisadov oni pafadis per muskedoj kaj fusiloj, tute proksime li vidis lipharajn vizaĝaĉojn de svedoj, iliajn malfermitajn kriantajn buŝojn, vidis kanonajn paftruojn, el kiuj estis elstarantaj eligantaj tondron kaj flamon tuboj de kanonoj, vidis transpendiĝintan oficiron, kiu svingis la spadon kaj celis al li per pistolo. Sed Semisadov malmulte atentis ĉion ĉi, tiel absorbita li estis de sia brulŝipo, de ĝiaj brulantaj veloj, de langoj de fajro, kiuj furioze fleksiĝis en la kanonajn truojn de la malsupra ferdeko...

Per hokstangoj kaj hokoj la svedoj penis deŝiri de la ŝipflanko la algluiĝintan brulŝipon, sed flamo lekis iliajn manojn, brulvundadis la vizaĝojn, la ligno de la ŝipo jam estis brulanta. Kaj tiutempe jam estis alirantaj la aliaj brulŝipoj, pikiloj kun forto enpikiĝadis en la ŝelon, brulis pulvo, peĉitaj ĉifonaĵoj, la kanonistoj fuĝis de siaj kanonoj, fumo kaj flamo kovris la paftruojn.

Nun estis pafantaj nur la malpezaj kanonoj de la supra

ferdeko, kaj eĉ tiuj ne ofte, ĉar la incendio fortranĉis la alirejojn al la pulvokamero kaj portantoj de pulvujoj ne plu povis fari sian aferon...

Semisadov, reveninte en la fortreson, kun peno lamis al avino Eŭdoĥa, anhelante sidiĝis sur la benkon, plendis, ke li estas grave vundita.

— Kie, fileto? — kompateme demandis la avino.

— La kruro, krureto mia blanka estas vundita, — diris Semisadov, — per kuglo vundita, avinjo...

La avino ekklopodis, komencis ŝiri tolojn. Semisadov sidis kvieta, malĝojis, poste flankenigis la avinon per la mano, postulis:

— Brandon, avinjo! Kiu homo estas vundita, al tiu oni brandon donas, mi mem aŭdis — Silvestro Petroviĉ diris. Ne avaru, avinjo...

Eŭdoĥa per la lacaj manoj verŝis gdanskan vodkon ĝis la randoj. Semisadov krucosignis sin, petis almanĝon. Taisja donis al li panpecon kun lardo. La ferdekestro eltrinkis, brave retroklininte la kapon, viŝis la buŝon, suspiris. Eŭdoĥa staris super li kun toloj, kun ŝmiraĵo, kun pura akvo. Semisadov manĝis.

— Manĝi, fileto, vi sukcesos, antaŭe lasu min pansi vin! — diris avino Eŭdoĥa.

La ferdekestro levis la krurumon. La vunditaj kanonistoj, matrosoj, soldatoj tuj tondris ride: la lignaĵo, kiu servis al Semisadov anstataŭ kruro, estis malsupre tute splitita de sveda kuglo. Avino Eŭdoĥa unue ne komprenis, poste ekridis per bonkora maljunulina rido, faligis la tolon, eksvingis al la

ferdekestro siajn manojn. Ekridis ankaŭ Taisja — unuan fojon dum ĉiuj ĉi teruraj tagoj.

— Kaj kio? — base diris la ferdekestro. — Se mi estas vundita — do donu brandon... Kaj sur kia kruro mi militas — estas mia afero. Hodiaŭ sur betula, morgaŭ sur pina, kaj poste, eble, eĉ propra nova elkreskos pro ĉiuj miaj laboroj. Oni diras, ke Solovkiaj miraklistoj ĉion povas... Ili preĝos diligente, kaj iros mi sur viva kruro...

6. La afero estas aĉa

— Aĉe! — diris Reger Ripley. — Malbone, Loftus. Viaj svedoj estas batitaj. Mi vetas dek kontraŭ unu, ke estas ĝuste tiel!

Loftus levis la manojn, ekkriis kun angoro:

— Mi ne vidas kaŭzojn ĝoji, *sir*! Mi ne komprenas, kial vi havas tiom gajan humoron. Kaj min, kaj vin, kaj *herre* Lebanius-on, kaj *herre* Swenberg-on atendas ŝnuro...

La veneciano ĝemis, kvieta Swenberg subite komencis malkonfesi: laŭ liaj vortoj rezultis tiel, ke li tute pri nenio kulpas, ĉio okazinta kun li estas stulta miskompreno, la rusa caro, kiam ekvidos Swenberg-on, tuj liberigos lin...

— Sed vi forgesas, ke mi ĉion konfesis! — diris per sia naza voĉo Loftus. — Mia vivo estis konservita nur tial, ke mi estis sincera kun la rusa kapitan-komodoro...

Super la tegmento de la domo, servanta por la fremdlandanoj kiel prizono, kun ŝriko traflugis kuglego kaj batiĝis apude. Kruĉeto, starinta sur la tablo, falis kaj frakasiĝis. Tuj batis dua kuglego.

— Jen al vi «batitaj»! — diris Loftus. — Ni ĉi tie pri nenio povas juĝi. La floto venis — tio por mi estas sufiĉa. La floto de lia moŝto reĝo estas ĉi tie.

Reger Ripley ekridegis:

— Kie ĉi tie? Ĉu sur la fundo? Diablo prenu vian moŝtan reĝon! Kiomfoje mi diradis al tiu sveda ĉefagento, kiu troviĝis ĉi tie antaŭ vi, ke militi kontraŭ la moskvianoj estas stulte, sed necesas komerci kun ili, kiel komercas Anglio.

— Vi diradis! — kriis Loftus! — Vi diradis! Sed monon vi tamen ricevis de ni, *sir*! Kaj nemalbonan monon. Kaj kio koncernas vian Anglion...

La kanonmajstro minacis al Loftus per la fingro:

— Ne tuŝu mian honoron, Loftus, mi tion ne ŝatas!

— Ho, fiera brito! — ekkriis Loftus. — Fiera, ofendita brito! Se ne via Anglio...

Ne leviĝante de sur la benko, Ripley batis Loftus-on per la pinto de la ŝuo al la femuro. La svedo retiriĝis al la muro, blanka pro furiozo, serĉante almenaŭ ion similan al armilo. La veneciano kun petego en la voĉo persvadis:

— Sinjoroj, mi petas vin, mi admonas en la nomo de ĉio por vi sankta. Eble, tio estas niaj lastaj horoj...

Ripley trinkis akvon, grumblis:

— Abomena kanajlo! Mono! Atendu, mi iam ĵetos al via vizaĝaĉo la monon! Li arogas riproĉi min per la mono! Ĉu mi malmulte faris pro tiu mono? Via Karolo devus superŝuti min per oro pro tio, kion mi faradis por li en tiu ĉi lando, sed al mi oni pagis bagatelojn. Mono!

En la domo aperis odoro de fumo, Swenberg tiris aeron per la multharaj nazotruoj:

— Ie brulas! Kaj forte brulas...

— En ilia fortreso estas multaj incendioj! — klarigis Loftus. — Mi aŭdas, kiel oni kuras kaj krias...

Reger Ripley respondis kun malica ĝojo:

— Kiom ajn ili havu da incendioj — la svedoj en Arĥangelsko ne estos! Arĥangelsko restos por ni, kaj ni ĝin akiros...

Li deŝiris peceton de papero, ekbruligis per flamo de kandelo, ekbruligis per ĝi la pipon.

— Ĉu nun estas tago aŭ nokto? — demandis Loftus.

En la domo, en kiu estis tenataj la fremdlandanoj, Ievlev antaŭ la batalo ordonis fermi la fenestron per tabuloj.

Ripley forturniĝis. Li havis horloĝon, sed paroli kun Loftus li ne deziris. Lin ronĝis kolero: la rusoj frakasis la svedojn, caro Petro, certe, estos tre kontenta, ĉiuj partoprenintoj en la batalo estos rekompencitaj. Nu, se ne ĉiuj, tiam multaj. Li, kanona majstro, ĉiuokaze estus rekompencita. Caro Petro aprezas tiajn fremdlandanojn. Kaj kiu scias, kia iĝus la vivo de majstro Reger Ripley, se li ne tentiĝus pro la sveda mono, sed servus nur al la angla krono...

Snufante per la pipo, la kanona majstro koleris: jen Lefort, ĝenevano, diboĉulo kaj nenio pli, eĉ metiojn li ne scias bone, sed kia iĝis persono. Estus Lefort la unua ministro, se li ne mortus tiel frue. Saĝa homo! Nenion eblas diri, — li komprenis, al kiu necesas servi. Kaj li, Ripley? Per kio finiĝos

tuta tiu ĉi stulta historio? Ĉu vere ili pendumos? Se iu kaptiĝis ĉe ili — estos malbone! Post Narvo ili iĝis koleraj, la moskvianoj, kaj ne tro ŝatas fremdlandanojn...

— Vere, odoras je fumo! — diris la veneciano. — Miaj okuloj larmas...

Ripley snufadis per la pipo. Li deziris bieron. Se li nun estus sur la remparo, sendube, rusa servisto donadus al li bieron. Li trinkadus bieron kaj komandadus pafadon. Kaj poste caro Petro kisus lin kaj promocius lin ĉefa kanona majstro. Ĉefa kanona majstro — tio estas multe pli, ol generalo. Generaloj lernas sian aferon, sed kanonaj majstroj — naskiĝas. Li konstruus por si domon en Moskvo, plantus florojn, elfosus stavon kaj venigus per poŝto sian Jenny-n. Kiel ŝi mirus, ekvidinte tian lukson. Kaj post kelkaj jaroj senfortiĝintan en la milito kontraŭ la svedoj Rusion konkerus Anglio. Frue aŭ malfrue, Anglio ĉion konkeros, ankaŭ la stultajn svedojn. Tiel oni diras en Londono...

— Aŭskultu, ni brulas! — diris Loftus.

Ripley kolere kraĉis. Li ne ŝatis, kiam oni malhelpas al li revi.

— Ni brulas! — pli laŭte diris Loftus.

La veneciano salte ekstaris de sia loko. Swenberg, alpremante la manojn al la brusto, ĵetiĝadis en la domo, ekkriadis:

— Tiuj barbaroj volas bruligi nin vivaj! Jes, jes!..

Da fumo estis jam tiom, ke flamo de la kandelo apenaŭ flagris. Ripley ektamburis per la boto al la pordo, la gardanto ne respondis. Tiam Lebanius kaptis la benkon kaj, svinginte,

komencis bati per ĝi al la sekfendiĝintaj tabuloj kun tia forto, ke unu el ili tuj defalis...

— He! Zoldato! — kriis en la truon la veneciano.

La gardanto, kiu kutime ĉiam staris en la vestiblo, ne respondis. La mordanta fumo plu rampis kaj rampis, kaj nun aŭdeblis eĉ krakado de proksima flamo.

— Zoldato! — kriis la veneciano, trostreĉante sin.

Ripley elprenis el la manoj de Lebanius la benkon kaj, tusante pro fulgo kaj fumo, batis ankoraŭ kelkajn fojojn. Defalis dua tabulo, poste tria. En la angulo, kie staris lama tablo, jam estis brulanta stupo, flavaj langetoj de flamo estis kurantaj inter traboj.

Sufokiĝante, Ripley plu batadis kaj batadis per la benko, ĝis elfalis ĉiuj pordaj tabuloj. Sed por saviĝi, necesis rompi ankoraŭ unu pordon — la eksteran, kun krado, kovritan per fero. Ili ree komencis bati per la benko, tamen la pordo ne cedadis, dum la domo jam brulis per arda flamo. La vesto sur Loftus komencis bruleti, la veneciano perdis la konscion, falis sur la plankon sub la piedojn de la aliaj. Ankoraŭ nemulte, kaj ili forbrulus ĉiuj, sed iu komencis rompi la pordon el ekstere. Loftus, ŝrikante pro doloro — langetoj de flamo jam estis vipantaj lin al la dorso, — ekstaris kvarpiede. Ripley same komencis malleviĝi sur la plankon, kiam la pordo finfine malfermiĝis kaj iuj virinoj eltrenis la fremdlandanojn en la fortresan korton. Ĉi tie, nemalproksime de la domo, kuŝis la gardanto, morte trafita de kuglego, lia frakasita halebardo kuŝaĉis apude. La virinoj, kompatante la brulvunditojn, alportis akvon, vokis iun kaporalon; la kaporalo kuris sub fajfantaj kuglegoj — serĉi Ievlev-on. Silvestron Petroviĉ-on li ne

sukcesis trovi, sed trovis inĝenieron Rezen-on, kiu, nenion bone kompreninte el konfuzaj klarigoj de la kaporalo, tamen venis kun li, por klarigi la situacion. Veneciano Lebanius jam mortis — sufokiĝis pro fumo, ankaŭ Loftus estis en tre malbona stato, spasme oscedadis kaj ĝemadis; nur anglo Ripley, vigle ridetinte, diris, ke dezirus drinki iomete da rusa vodko, kaj tiam ĉio estos bona. La inĝeniero ordonis alporti vodkon, sed lin oni tuj vokis, kaj li kuris en la remparojn al siaj kanonoj. Ripley eltrinkis la vodkon, diris al juna fortika pomorino:

— Rusa virin' — bona virin'!

La pomorino ekridis, montrante etajn egalajn dentojn. Ripley pensis: «Jenny-n eblas ne inviti, Jenny estas magra, eblas edziĝi al rusa virino!» Kaj li ankoraŭ trinkis vodkon.

Loftus ĝemis, Ripley puŝis lin per la pugno al la flanko, diris en la angla, kun gaja, malfermita rideto, por ke la rusaj virinoj pensu nenion malbonan:

— Vi, diablo vin prenu, ekregu vin. Nia vivo dependas de ni...

Swenberg same malfermis la okulojn, komencis aŭskulti. Larĝe ridetante, Ripley daŭrigis:

— Poste ni diros, ke ili bruligis la venecianon kaj deziris bruligi nin, sed nun nia loko estas sur la remparo, kie pafas kanonoj. Ĉu vi komprenas? Brulvunditaj, maljuste ofenditaj, ni, kiel herooj, pafos al la svedoj. Kolektu viajn fortojn kaj sekvu min!

Loftus ĝemis, demandis:

— Ĉu pafi al svedoj?

— Kiam temas pri vivo kaj morto, tiaj, kiel vi, pretas pafi al propra patro! — kun la sama malfermita rideto diris Ripley. — Leviĝu, alie ni malfruos!

Li la unua leviĝis sur la fortresan remparon kaj per sperta okulo de malnova dungito tuj taksis la staton de la svedoj: ili malgajnis la batalon, kvankam ankoraŭ estis plu batalantaj. Sur la flagŝipo plu pafadis nur kelkaj kanonoj, sed la ŝipanaro estis forlasanta ĝin — la ŝipo brulis. Sur la fregato estis pafantaj kanonoj de la kanonferdeko.

Sur la dua fregato estis pafantaj ĉiuj kanonoj, sed ĝi por nenio taŭgis, tiu fregato, ĉar la du jaĥtoj kaj la tria fregato jam estis prepariĝantaj forlasi Dvinon kaj foriri, uzinte favoran venton. La tri lastaj ŝipoj ankoraŭ estis defendantaj sin per pafado, sed nur por havi eblon foriri. Al ili same estis malbone: kuglegoj de la baterio de la Marka insulo atingadis ilin. Krome, Silvestro Petroviĉ ordonis al kanonistoj malleviĝi kun kanonoj pli malsupre laŭ Dvino kaj bati al la fuĝanta fregato tiel, ke ĝi perdu stirkapablon kaj haltigu la jaĥtojn...

Ĉi tie, sur la remparo, la rusoj same havis nemalmultajn perdojn, sed ĉi tie regis ordo, kaj laŭ vizaĝoj de simplaj kanonistoj videblis: ili gajnas la batalon kaj scias, ke venkos. Ordo estis en ĉio: kaj en tio, kiel vigle kaj rapide estis liverataj supren kuglegoj, kaj en tio, kiel oni portadis pulvon, kaj en tio, kiel oni obeadis Rezen-on, Teodozon Forĝiston kaj aliajn estrojn. Kaj la vizaĝoj de la rusoj esprimadis severan trankvilon, tiel karakteran por tiu popolo en minutoj de granda laboro.

Ripley trairis la ĉefan eksteran remparon, ŝovis en la buŝon la pipon, levis la manikojn de la bruldifektita kaftano kaj mem,

per la fortaj, blankaj, kovritaj de rufa lanugo manoj, grakinte, turnis kanonon «Lupon», kiun li ankoraŭ antaŭ nelonge riparis en la Kanona korto. La kanono estis sendifekta, kaj tuj kiam Ripley turnis ĝin, al li alkuris rusa junulo — helpanto de la pereinta kanonisto.

— Ho, ĝi estas bonega kanono, — per karesa, ankoraŭ juna voĉo ekparolis la helpanto, — ho, kiel ĝi pafas! Nur nia kanonisto — Filipo Filimonoviĉ — estas mortigita, kaj mi sola ne povas, ne estas mi instruita, kiel direkti; mi pafis dufoje, sed maltrafe, nun mi timas...

Ripley kapjesis, ordonis purigi la tubon. La helpanto per ambaŭ manoj levis la skovelon, poste donis pulvujon, poste kuglegon. Ripley, kunmetinte la lipojn, kolerante al la svedoj, ke ili malgajnis la batalon, kolerante al si, ke li ne divenis, al kiu servi, mallarĝigante la okulojn, direktis la kanonon al iomete sub la pobkastelo, atendis, kiam ĉesos pafado, en silento, laŭte, por ke ĉiuj rigardu al li, kriis al si mem komandon: pafu! — kaj enpremis la meĉon en la fuzeon. La kanono tondris, la kuglego kun ŝriko impetis super Dvino, trabatis la ŝelon de la ŝipo, el tie tuj elĵetiĝis flamo.

Rusaj kanonistoj rigardis al la fremdlandano, — bone batis, scipovas pafi. La helpanto jam estis priverŝanta la tubon per odora vinagro, preparanta duan ŝargon. Ripley ekiris sur la remparo, firme tenante la pipon en la dentoj, korektadis kanonojn por rusaj kanonistoj, frapadis la moskvianojn al la ŝultroj, diradis raŭke:

— Rusa kanonist', bona kanonist'! Tre bona!

Loftus-on kaj Swenberg-on li starigis al alia karonado, diris per minaca voĉo, en la angla:

— Direktos mi! Kaj vi pafados kiel eble plej rapide! Ĉiuj vidu nin! Ĉiuj!

— La sveda flago! — ekkriis Loftus. — La ora kruco de Svedio... Vi ne aŭdacas pafi al tiu flago!

Ripley dolore puŝis Loftus-on al la ŝultro, almontris per la okuloj dekstren: el tie estis iranta, apogante sin sur bastono, pala pro sangoperdo kaj laco kapitan-komodoro Ievlev. Kvazaŭ ne rimarkante lin, la anglo kontrolis la ŝargon, turnis sur pivoto la tubon, enpremis la meĉon. La kanono ree tondris, la kuglego enflugis en malfermitan paftruon de la meza ferdeko...

— Granda viktori'! — diris li en la rusa al Ievlev tiel laŭte, ke aŭdu ĉiuj ĉirkaŭe. — Kolosa viktori'! Diablo prenu, damna sved'!

Kaj, ekrideginte, aldonis:

— Aj-aj-aj, *sir*! Ni preskaŭ brulis en la dom'. Unu nia — mort'. Mortis. Li iĝis rostaĵo, jes, tiel...

Silvestro Petroviĉ larĝe malfermis la okulojn, ne komprenante. Ripley ree kliniĝis al la kanono:

— Ne nun, *sir*! Nun necesas militi! Nun necesas fini tiu sved'!

Ĉapitro naŭa

Kaj nun ni forlasas vin tute en sol'
Restanta kun gloro senmorta...
Kozlov

La rusan soldaton ne sufiĉas mortigi, lin ankoraŭ necesas faligi.
Frederiko II

1. Geknaboj

Tuj kiam la svedoj komencis bombardadon de la fortreso, Manjo kondukis la infanojn en la kelon. Unue ĉi tie sidis nur la knabinoj de Ievlev kaj Ivaĉjo Rjabov, poste Maria Nikitiŝna komencis peli ĉi tien ankaŭ aliajn geknabojn, juĝinte, ke ĉi tie por ili estos multe pli sendanĝere, ol sur la ekzercoplaco, kie ili ĝoje gapis svedajn ardajn, saltantajn sur pavimŝtonoj kuglegojn.

La infanoj en la kelo enuis, speciale kiam Maria Nikitiŝna, forirante al Taisja aŭ sur la turon al Silvestro Petroviĉ, fermadis la kelon ekstere per ligna bloko.

Kiam Maria Nikitiŝna foriris trian fojon, Ivaĉjo Rjabov diris firme:

— Iru ankaŭ ni! Por kio ĉi tie malĝoji!

— Panjo ne permesis! — respondis obeema Irenjo.

— Jes, panjo ne permesis! — subtenis ŝin Venjo.

— Do sidu! — koleriĝis Ivaĉjo. — Sidu ĉi tie, sed mi iros,

mi sidis sufiĉe...

Kaj ne hastante, per sia Rjabov-a irmaniero li leviĝis laŭ ŝtupoj supren. La ŝtipo defalis, Ivaĉjo eliris sur la ekzercoplacon, ĉirkaŭrigardis kaj konsterniĝis: rekte kontraŭ la elirejo el la kelo estis hele kaj gaje brulanta la tegmento de la domo de la kapitan-komodoro, de ĝuste tiu domo, kie li, Ivaĉjo, plurfoje gastis, kie hodiaŭ restis lia ludila, plene rigita, farita de la patro, ŝipo, kaj kie staris lululoj kun pupoj de liaj amikinoj — la filinoj de Ievlev.

Starinte iom kun malfermita buŝo, Ivaĉjo turniĝis kaj kriis en la kelon:

— He, fraŭlinoj! Ja via domo per flamo brulegas!

La «fraŭlinoj» kun aliaj geknaboj, frapante per la piedoj, ekkuris supren kaj same malfermis la buŝojn. Al la domo de Ievlev jam estis haste irantaj fortresaj monaĥoj, destinitaj por tiu ĉi tago batali kontraŭ fajro, se ĝi aperos ie en la citadelo. La monaĥoj kunhavis sitelojn, hokstangojn, hokojn. Kaj dum unuj estingadis, aliaj, priverŝinte sin per akvo, rapide enkuradis en la domon kaj ion el tie elportadis; sed ĉio ĉi estis aĵoj, kiuj interesis nek Ivaĉjon, nek la knabinojn: nek la ŝipon, nek la lulilojn kun la pupoj portis la monaĥoj.

— Jen! — paŭtante, diris Venjo. — Ne portas!

— Tie ankoraŭ da flikpecoj tuta korbo estis! — tordiĝante pro ploro, prononcis Irenjo.

Ivaĉjo ĉitis al ili, kaj ili dum mallonga tempo ne ploris. Sed kiam la monaĥoj elportis kunrulitan tapiŝon, Irenjo subite rememoris, ke la pupaj lululoj staris ĝuste sur tiu ĉi tapiŝo, kaj ekploris plenvoĉe. Venjo ekploregis post ŝi.

— Nu, komencis! — prononcis Ivaĉjo. — Torento!

Kaj per la ŝultro antaŭen, malgranda, kun severa mieno, li ekiris al la monaĥoj. La «fraŭlinoj» ĉesis plori, aliaj geknaboj kun intereso rigardis al la rudrista filo. Ivaĉjo atendis, ĝis apud la siteloj estos neniu el la monaĥoj, rapide verŝis akvon sur sian kapon kaj same per la flanko, per la ŝultro antaŭen eniris en la vestiblon, kie estis multe da fumo kaj kie staris brulodoro. Ĉi tie iu kaptis lin je la hartufo, sed li elŝiriĝis kaj ekkuris tra la konataj ĉambroj — tien, kie li lasis sian rigitan ŝipon inter la pupoj kaj la lululoj, inter flikpecoj kaj aliaj ludiloj. Fumo mordadis liajn okulojn, li preskaŭ nenion vidis, sed tamen trovis kaj la ŝipon, kaj la lululojn, kaj la pupojn, kaj la korbon kun flikpecoj. Envolvinte ĉion ĉi en iun ĉifonon, li survoje prenis ankoraŭ tri librojn, kiujn antaŭ nelonge legis Silvestro Petroviĉ, kaj ŝarĝita de sia akiraĵo, nigra kaj fulgokovrita elsaltis sur la peronon, kie iu el la monaĥoj kaptis lin kaj donis al li bonan nukbaton. El la manoj de la monaĥo Ivaĉjon elkaptis Maria Nikitiŝna kaj, plorante, komencis kisi lin kaj lamenti super li. Kaj la filinoj de Ievlev kaj aliaj geknaboj demandadis lin — kiel tie estis, ĉu tre timige aŭ ne tre.

— Nu! — diris Ivaĉjo, elturniĝante el la manoj de Maria Nikitiŝna. — Nenio tie estas speciala... Estas fumo kaj brulodoro, sed eniri kaj eliri eĉ vi povus, ne malfacile...

Tiutempe ankoraŭ unu sveda kuglego, kun hurlo tranĉinte la aeron, falegis apude sur ŝtonojn kaj ekturniĝis sur la pavimo. Maria Nikitiŝna kaptis la filinojn kaj, puŝante antaŭ si Ivaĉjon, pelis ilin ĉiujn en la kelon. Irenjo kaj Venjo kuris, faligante flikpecojn, post ili kuris en la kelon la aliaj infanoj kaj neniel povis kompreni, kial la edzino de la kapitan-komodoro ĉiam

ploras, kaj ridas, kaj ree ploras...

En la kelo Maria Nikitiŝna malvolvis la librojn, kiujn eltiris Ivaĉjo el la ĉambro de Silvestro Petroviĉ, kaj por si flustre legis: «Isaako Neŭtono»...

La libro elfalis el ŝiaj manoj, laŭ la vangoj ekfluis abundaj larmoj, ŝi subite alpremis la kapon de Ivaĉjo al sia brusto kaj, sufokiĝante pro larmoj, nekompreneble ekparolis:

— Isaako Neŭtono, ho Dio! Kaj kiom da mortintoj! Kaj via paĉjo estis vundita, knabinoj, kaj kio ankoraŭ estos, kaj Ivano Sabateiĉ... Ho, infaneto mia amata, knabeto kara...

2. Mortintoj

«Krono» flamis — la rusaj brulŝipoj faris sian aferon. Kaj grafo Gyllenstierna, starante sur la pobferdeko, ordonis al la klarionistoj ludi retreton. La klarionistoj levis la klarionojn al la ĉielo, sed en hurlado kaj fajfado de flamo neniu aŭdis la signalon, kaj eĉ da homoj sur la flagŝipo restis nemulte.

Vento ŝanĝiĝis, ruĝaj fumaj langoj de fajro jam estis lekantaj la buspriton de la fregato, kiu koliziis kontraŭ «Krono». Tie la ŝipanaro ankoraŭ penis lukti kontraŭ flamo, sed tion estis farantaj nur nemultaj kuraĝuloj. La plej granda parto de la matrosoj sur savboatoj estis foriranta al la jaĥtoj kaj al tiu fregato, kiu sub pafado de la rusaj baterioj penis returni sin en Dvino, por, levinte la velojn, eliri el la batalo.

Al la subadmiralo sur la pobferdekon leviĝis leŭtenanto Plomgren. Ankoraŭ du iuj oficiroj, kiujn ne konis Gyllenstierna, kune kun Plomgren komencis persvadi lin forlasi la flagŝipon. La subadmiralo silentis: li aŭskultis

tondradon de la rusaj baterioj, rigardis, kiel pereas kaj malhonore fuĝas lia eskadro, pensis pri tio, ke ĉio estas finita kaj saviĝo ne plu ekzistas. Li devis morti, li sciis tion, kaj faris ĉion por perei, sed la sorto estis punanta lin pli terure, ol per morto. Li devis, antaŭ ol morti, travivi tutan honton de malhonoro. Li devis ekvidi, kiel fuĝas liaj homoj, li devis aŭdi malbenojn de matrosoj, kiuj antaŭe tremis pro unusola lia rigardo.

— Do, — nelaŭte diris li, — mallevu la velboaton...

Sed la velboaton jam ne eblis mallevi, kaj subadmiralo Gyllenstierna forlasis sian «Kronon» sur malgranda savboato, fuĝis de la brulanta ŝipo, forlasis la flagŝipon kaj ne plu retrorigardis al ĝi eĉ unufoje, — li timis rigardi, vidi, pensi. Li sidis en la savboato ĝibetiĝinte, ferminte la flavan vizaĝon per la flavaj polmoj, — malgranda maljunuleto en kupra kasko kun virkokaj plumoj.

— Premu! — komandadis Plomgren al la remantoj. — Larĝe remu! Premu!

Kadavroj, rompaĵoj de mastoj, jardoj, iaj bareloj, kestoj malrapidigadis la savboaton. Rusaj kuglegoj kun fajfo kaj siblo faladis en Dvinon, levante akvajn fostojn.

— *Herre* subadmiralo, demetu la kaskon! — petis Plomgren. — Ili vidas admiralon...

— Al diablo! — diris Gyllenstierna.

Laŭ ŝnureskalo li leviĝis sur tiun fregaton, kiu estis returniĝanta sub pafado de la rusaj baterioj, sur la fregaton de malkuraĝuloj. Ĉi tie multaj estis ebriaj kaj ne rekonadis sian subadmiralon aŭ ŝajnigadis, ke ne rekonas. Ĉi tie jam neniu

helpadis al vunditoj, kaj ili rampis sur la pobkastelo, petegante mortpafi ilin. Kaj sur la pobferdeko kuŝis la komandanto de la fregato kun frakasita kapo. Lia mano estis premanta botelon da brando.

Leŭtenanto Plomgren penis instali ordon, sed lin neniu aŭskultis, kaj kiam li levis trancilon — oni mortigis lin. Tio estis finita fregato, kaj grafo Gyllenstierna restis sur ĝi nur por morti. Ŝrikantaj kuglegoj de la rusoj, siblante, disŝiradis velojn, rompadis mastojn, jardojn, ŝipflankojn, priŝutadis per mitrajlo matrosojn, kiuj ĵetiĝadis en la akvon, por saviĝi naĝe. Kuglegoj faladis apud la subadmiralo, apud liaj piedoj detruiĝadis la ferdeko, ĉe lia vizaĝo mem traflugadis lignaj splitoj, ferkovrita pulio kun fajfo flugis ĉe lia tempio mem, — sed li plu estis viva. Flava, kun estingiĝinta rigardo, kun mallevita spado en la mano, la subadmiralo de la floto de lia reĝa moŝto povis nun nur silente rigardi al la detruoj, okazantaj sur la fregato.

Li ekiris tra la pobkastelo, serĉante morton.

Mortintoj, naĝantaj en sangaj flakoj, mortintoj sidantaj, mortintoj, rigidiĝintaj ĉe kanonoj, mortintoj kun vitriĝintaj okuloj baradis al li la vojon. Li surtretadis per la ŝuoj malvivajn korpojn, kaj radetoj de liaj spronoj elŝiradis pecojn el vestaĵoj de mortintoj. «Koruptebla kanajlaro! — kun kolera malestimo pensis li. — Damnitaj malpuraj dungitoj!»

Matroso, kiun li ne konis, diris al li arogantaĵon, li retrorigardis, serĉante ekzekutiston Svante-n Bagge-n, kaj rememoris, ke la korpo de la ekzekutisto, probable, jam finbrulas sur «Krono». Tiam, por pli baldaŭ morti, Gyllenstierna batis la matroson al la vizaĝo per la plata flanko de la spado. Tiu ŝrikis pro doloro, ĵetiĝis al li kun trancilo. La

subadmiralo faris mallongan atakpaŝon, kiel en la tagoj de sia fora juneco, kaj kun peno eltiris la spadon el la brusto de la dungito, ne kovrita per kiraso.

Viŝante la spadon, li ekvidis, ke flanko ĉe flanko kun la fregato trairis jaĥto. Ili sukcesis saviĝi — ili estis forirantaj en la maron. Sed post kelkaj momentoj li rimarkis, ke el post salikaro, dense kreskinta sur la bordo de Dvino, unu post alia eliras boatoj de rusoj. Sur la boatoj estis matrosoj kun hokstangoj, kun eskaloj, kun mallongaj lancoj. Ili iris transverse al la jaĥto, por preni ĝin per ŝipatako.

Gyllenstierna forturniĝis. Kaj tuj falis sur la glitigan pro sango ferdekon, senkonscia, sur la dorson. Kaj la rusa kuglego, kiu trafis lin, ankoraŭ longe turniĝadis kaj sibladis apude, puŝante mortintojn kaj vunditojn, — la lasta kuglego, kiun la rusoj pafis al la eksilentinta fregato.

3. Ĉio estos bona!

Kiam antaŭ multaj horoj la antaŭa sveda ŝipo kun elstarantaj el la paftruoj kanonoj, kun flirtantaj flagoj, kun soldatoj en maŝkirasoj kaj kupraj kaskoj, kliniĝante, sub plenaj veloj aperis sur la Dvina ŝanelo, Taisja staris sur la ekstera remparo de la fortreso. La flagŝipo, elirinte el la pluva vualo, estis moviĝanta al la citadelo; Taisja, etendinte antaŭen la maldikan kolon, atendis. Ŝia koro batis laŭte, la vizaĝo paliĝis. Per tuta sia esenco ŝi sciis, ke devas okazi ia mirinda evento, kaj en la menso ligis tiun eventon kun sia subite malaperinta antaŭ kelkaj tagoj edzo.

Kaj la evento okazis: al ŝi ne necesis klarigi, kio fariĝis. Kaj ŝia juneco kaj la jaroj de knabineco pasis ĉe la maro. Rudristo,

kiu kun tia certeco kondukis la grandegan multkanonan ŝipon laŭ la Dvina ŝanelo, ne povis erare trafi al malprofundaĵo. Li povis fari tion nur intence, propravole, oferinte sian vivon por siaj amikoj, kaj tiu rudristo estis, sendube, Rjabov.

En tiuj mallongaj momentoj, kiam la skulptita el ebono grandega virgulino super la busprito de la flagŝipo leviĝis en la aeron, kaj la tuta ŝipo kun knaro kaj grinco kliniĝis, kiam sur la pobkastelo ekkrakis pafoj kaj komenciĝis batalo, Taisja tuj komprenis: estis farita heroaĵo, kaj ŝia rudristo estas tie, inter malamikoj. Strecĉegante la vidsenton, aŭdante nek tondradon de kanonoj, nek fajfadon de kuglegoj, nenion rimarkante, ŝi rigardis al la ŝipo, kie, probable, en tiuj minutoj furiozantaj svedoj estis turmentantaj kaj mortigantaj la karan por ŝi homon, la homon, kiun ŝi tiomfoje perdadis kaj ree trovadis. Ŝi tamen ankoraŭ plu esperis, ke li saviĝos, ĵetiĝos de la ŝiprando en la akvon kaj naĝos al la fortreso, al ŝi, sia edzino, al sia filo...

Sed tempo iris, la rudristo ne estis.

Ĝis doloro en la okuloj fiksrigardadis Taisja la grizajn akvojn de Dvino, sed vidis en ili nur kadavrojn de svedoj en verdaj kaftanoj...

Poste, pansante vunditojn, donante al ili akvon kaj manĝon, helpante al avino Eŭdoĥa en ties mizerikorda laboro, ŝi ecĉ por unu momento ne forgesadis pri sia terura malfeliĉo, sed ŝia aflikto kvazaŭ malproksimiĝadis, kvazaŭ kvietiĝadis, kaj la koro ĉiam pli kaj pli pleniĝadis per sento de hela fiero, kiam aŭdis ŝi konversaciojn de vunditaj kanonistoj, matrosoj kaj soldatoj pri la rudristo, kiun oni per forto devigis konduki la eskadron, kaj li submetis ĝin sub la kanonojn de la fortreso...

La nomon de la rudristo multaj ankoraŭ ne sciis, sed ŝi ja

sciis firme, ke tio estas ŝia Ivano Sabateiĉ, kaj tamen al neniu diris, trovante konsolon al sia malfeliĉo en tio, ke vunditoj en ŝia ĉeesto konjektadis la sorton de la kuraĝa kaj fidela rudristo. Kun avido kaj danka lumo en la okuloj ŝi aŭskultis tiujn, kiuj supozadis, ke la rudristo tute povus saviĝi. Unu vundita kanonisto certigadis, ke li eĉ vidis mem, kiel iu homo sur la pobkastelo estis batalanta per hakilo, forirante de atakanta lin homamaso.

La batalo daŭris kaj daŭris, kanonoj pafadis, vunditoj kaj mortigitoj ĉiam pli multiĝadis, kaj Taisja jen esperadis, jen ĉesadis kredi. Al ŝi ŝajnis, ke la rudristo iras sur la fortresa remparo kaj jen tuj vokos ŝin, diros ŝian nomon. Aŭ ŝajnis al ŝi, ke li vokas ŝin de la bordo, vundita, ne povas eliĝi el la akvo kaj mortas sur la ĉeborda sablo. Tiam ŝi konfuziĝadis, rigardis senmove aŭ subite kuradis sur la remparon, super kiu fajfis kuglegoj, kaj ree longe, kun malgajo rigardadis al la Dvinaj akvoj, sur kiuj estis balanciĝantaj korpoj de mortigitaj svedoj...

Kiam Silvestro Petroviĉ estis vundita kaj soldatoj portis lin sur mantelo sub la fortresan muron al avino Eŭdoĥa, Taisja senmoviĝis pro ektimo, — ŝajnis, ke tuj li diros al ŝi certan kaj teruran sciigon. Sed li silentis. Sur lia sensanga vizaĝo brilis la bluaj okuloj. Ŝi donis al li kruĉeton kun akvo, li lipis, suspiris, prenis Taisja-n je la mano. Eble, li ne rekonis ŝin, eble, simple estis en senkonscieco, kiam diris laŭte, firme, klare:

— De la rusa homo la nomon teni honore kaj minace!

Taisja nenion respondis, aliaj vunditoj levis la kapojn de la pajlo, fiksaŭskultis. La kapitan-komodoro ree eksilentis por longe.

— Honore kaj minace... — ripetis juna matroso flustre.

Silvestro Petroviĉ aŭdis la flustron, klarigis:

— En malnovaj tempoj oni tiel diris: por ke en la tuta mondo la nomon de la rusa homo oni tenu honore kaj minace.

Avino Eŭdoĥa strikte strecîs lian kruron per tolo, li ankoraŭ iomete kuŝis, vokis siajn soldatojn, ili ekkondukis lin reen sur la pordegan turon — komandi. Liaj brovoj estis severe kuntiritaj, la lipoj kunpremitaj. Taisja akompanis lin ĝis la ŝtuparo, plu esperante aŭdi vorton pri la rudristo. Ĉe la ŝtupoj li haltis por retrovi la spiradon, diris kvazaŭ en disputo:

— Fortreso! Kion valoras fortreso? Homo — jen fortreso vera, nevenkebla. Homo!

Taisja aŭskultis, retenante spiron, al ŝi ŝajnis, ke Silvestro Petroviĉ parolas pri la rudristo. Kaj li vere parolis pri li.

— Fortreso! — ripetis li, profunde rigardante en la okulojn de Taisja. — Rjabov, la rudristo, — jen fortreso, pli fidinda ol kiu ne estas sur la tero. Li faris heroaĵon. Al li ni ŝuldas multon en ĉi batalo, al li, kaj al forpasinta Krikov, Atanazio Petroviĉ, kaj ankoraŭ al samaj rusaj homoj...

— Silvestro Petroviĉ! — ekkriis ŝi. — Silvestro Petroviĉ!

Sed al li aliris Jegorĉjo Pustovojtov kun demando pri tio, kiel eliru la ŝipatakaj boatoj, kaj la kapitan-komodoro foriris kun li.

Pli proksime al vespero Taisja eksciis, ke inĝeniero Rezen pridemandas kaptitajn svedojn, elnaĝintajn sur la Dvinan bordon apud la fortreso. Malsekaj, frostiĝintaj, timigitaj de atendo de morto, ili tremante sidis sub la muro, kien ne faladis kuglegoj, per sovaĝaj okuloj rigardis al rusaj forĝistoj, ardigantaj en forno rondajn ŝtonojn. Unu — alta, kun blankaj

haroj — estis vundita al la ŝultro kaj tenis la vundon per la mano; la sango fluis laŭ liaj fingroj. Alia, same vundita, penis ion klarigi al sia gardanto, almontrante la muskedon, poste sian bruston.

— Mortpafi sin li petas! — klarigis matroso. — Ne bezonas li, diras, tian vivon...

— Nu, do stultulo! — kriis la gardanto. — Ne bezonas. Al ni po unu estas donita, ne po du. Unun li perdos, alian ne ricevos...

Taisja aŭskultis, trovis Rezen-on, demandis de li nekuraĝe:

— Ĉu svedaj homoj pri la rudristo nenion scias, sinjoro? Eble, ili almenaŭ unu vorton diris?

Rezen ne komprenis. Taisja rakontis detale, li, konsolante, tuŝis ŝian manon:

— Ho ne, ne, ĉu ni povas diri, ke li estis mortigita? Li malestas — tio estas vero, sed tio ankoraŭ ne signifas, ke li estas mortigita, tio ankoraŭ nenion signifas. Unu, kiu estis kun li, mortis, tion ni bone scias, la tradukisto, li mortis sur la Marka insulo. Sed la piloto — ne, pri la piloto ni ankoraŭ ne scias...

Taisja senspire rigardis al la inĝeniero. Li ankoraŭ foje tuŝis ŝian manon:

— Ĉio estos bona, jes, jes, la kapitan-komodoro sendis serĉi, oni lin serĉas, la piloton, lin serĉas soldatoj, matrosoj, serĉas ĉiuj. Ili trovos lin. Oni neniam perdu esperon...

4. Rusa flago

Fulganta akra fumo rampis sur la pobkastelo de la ŝipo,

forlasita de la ŝipanaro.

Gyllenstierna turniĝis sur la flankon, stertoris, faris ankoraŭ unu penon kaj ekvidis super si la bluiĝantan nordan nehelan ĉielon, sur kiu kuris ŝiritaj nuboj.

Kiom da tempo pasis?

Eble, plu daŭris la sama senfina tago, eble, venis la nova?

Li streĉiĝis, kvietiĝis: al li ŝajnis, ke li aŭdas tondron de kanonado. Sed estis tute ne tiel: sur «Krono» — sur ferdekoj, ĉe kanonoj — estis eksplodantaj pulvujoj. La subadmiralo suspiris kun faciliĝo: tamen la batalo ankoraŭ ne finiĝis, la sorto favoris lin, li mortos sub tondro de siaj kanonoj. Kaj por morti kun honoro, kiel decas al admiralo, li devigis sin turni la kapon — tiam li ekvidos la svedan flagon sur la ĉefmasto, la bluan flagon kun ora kruco, la flagon, al kiu li servis dum tuta sia longa vivo.

Sed la flago ne estis.

Anstataŭ la blua tuko li ekvidis blankan ĉifonon, kiu flirtis en Dvina vento. Ankoraŭ unu bato de la sorto, ankoraŭ unu lasta humiligo; la damnitaj dungitoj kapitulacis kaj fuĝis de la ŝipo, por ili plej grave estis konservi siajn vivojn, siajn aĉajn, al neniu necesajn vivojn...

Sufokiĝante pro doloro kaj furiozo, mallonge kaj raŭke spirante, kolektinte lastajn fortojn, li ekrampis al la masto, por peni deŝiri tiun hontindan blankan ĉifonon. Sed fortoj ne estis, rampi li ne povis. Li povis nur alpremi al la ferdeka kovraĵo sian flavan maljunan vizaĝon kaj kuŝi tiel senmove, alvokante Dion kompati kaj sendi al li baldaŭan morton, kiu ĉiam ne venadis, ĉiam prokrastadis...

Li ree perdis la konscion kaj rekonsciiĝis pro tio, ke iu per lertaj kaj rapidaj moviĝoj estis priserĉanta lin, palpserĉis en liaj poŝoj. Li ne havis fortojn turniĝi, sed la fortaj manoj turnis lin, kaj li ekvidis proksime super si la malhelan, malmildan vizaĝon de ferdekestro del Robles. La hispano, preminte subbrake la pistolon, estis prirabanta sian admiralon, kaj Gyllenstierna ne miris pri tio, li nur petis apenaŭ aŭdeble:

— Mortigu do min, kanajlo! Mortigu antaŭe...

Sed la ferdekestro faligis la pistolon kaj retropaŝis. Kaj ree ektreniĝis tempo, senfina tempo.

Probable, pasis ankoraŭ multaj horoj, antaŭ ol Gyllenstierna rekonsciiĝis. Estis abrupte kaj proksime krakantaj muskedoj kaj fusiloj. Li devis fari nekredeblan fortostreĉon, por levi la kapon. Per siaj flavaj nepalpebrumantaj okuloj li longe rigardis al altaj homoj en mallongaj jakoj sen manikoj, en trikitaj ĉapoj, rigardis, kiel ili mastre iras sur la pobkastelo, malleviĝas en lukojn, surverŝas la bruletantan pobon kaj interparolas inter si per lacaj krudaj voĉoj de batalistoj, venkintaj en batalo. Kaj subite li komprenis, ke sur la ŝipo estas rusoj, ke la ŝipo estas kaptita kaj ke la sorto preparis por li ankoraŭ lastan teruran baton — oni militkaptos lin.

Kvazaŭ en nebulo, li vidis nemalproksime de si pezajn grandajn botojn, vidis, kiel al la piedoj de rusa maristo falis la blanka ĉifono, vidis, kiel la ruso alligas al la ŝnuro tukon de trikolora flago, saman, kiel tiu, kiu flirtis sur ilia fortreso.

Jen kion preparis al li la sorto antaŭ la kaptiteco: li devis ankoraŭ vidi, kiel sur la ĉefmasto de la sveda milita fregato leviĝos rusa flago.

Ne, tion li ne vidos. Sufiĉas da malhonoro en lia vivo. Sufiĉas por li da humiligoj.

Flustrante insultojn per la sekiĝintaj sensangaj lipoj, li levis la pistolon, faligitan de la hispana ferdekestro-rabisto, kaj komencis celi al tiu ruso, kiu jam estis tiranta la flagon. La rusa flago, flirtigata de Dvina vento, estis malrapide leviĝanta sur la maston. Kaj Gyllenstierna celis, celis senfine longe.

Sed la pafon li ne aŭdis.

En la pulvujo de la pistolo ne estis pulvo.

Kaj neniu el la rusoj aŭdis, kiel klakis la ĉano.

La rusoj per ardaj okuloj rigardis al la ĉefmasto, tien, kie gaje flirtis sub vento la grandega, nova, trikolora flago. Kaj eksplodo, kiu tondris super Dvino, — duone disrompiĝis kovrita de flamo «Krono», — kvazaŭ salutis la venkon de la rusoj kaj samtempe sciigis la svedojn, ke ilia komandanto, subadmiralo grafo Eriko Gyllenstierna direktis sin en la lastan navigadon, el kiu neniu kaj neniam revenadis.

5. Viktorio

Per rapidaj paŝoj Taisja ekiris laŭlonge de la fortresa muro trans la preĝejon, kie ĉe ferkovrita barilpordeto staris gardisto kun muskedo, puŝis la barilpordeton, batis al la fero per la maldika mano.

— Kial vi frapas? — demandis la gardisto. — Ne estas permesite tien iri...

— Soldatoj tien iris kun matrosoj! — diris Taisja. — La rudriston serĉi, Rjabov-on, tiun, kiu la svedan ŝipon surgrundigis, kaj mi estas de li, de la rudristo, edzino, tralasu

min pro Dio...

La gardisto tiris feran riglilon, la barilpordeto malfermiĝis, Dvina vento puŝis la vizaĝon de Taisja. Ĉi tie estis tombejo, fortresa sepultejo, en kiu laborantoj, kunpelitaj per la cara ukazo el ĉiuj flankoj de la Dvina tero, enterigadis mortintojn dum la konstruado de la citadelo. Sub betulaj kaj pinaj krucoj, ĉe de ili mem konstruitaj muroj, eterne dormis Kargopolaj, Kevrolaj, Mezenaj masonistoj, portistoj, ĉarpentistoj, terfosistoj el Ĉarondo, Pinegaj, Arĥangelskaj, Ĥolmogoraj forĝistoj. Kaj estis strange vidi nun sur tiu tombejo svedajn matrosojn kaj soldatojn, saviĝintaj de morto...

Ili estis ĉi tie multaj, ili iris renkonten al Taisja, sub gardo de monaĥoj kun halebardoj, stumbladis sur tombaj holmetoj, ĝemadis, faladis, ree ekstaradis — palaj, silentaj, elturmentitaj...

Ĉe la akvo ŝi haltis, pensis — kien povus naĝi la rudristo. Kaj, nenion decidinte, ŝi ekiris laŭlonge de la rivero, fiksrigardante al ondoj, alirante al ĉiu mortinto, kiun la akvo elportis al la bordo.

Ŝi iris longe, ŝiaj piedoj enfaladis en profundan ĉebordan sablon, dronis en marĉo, la kapo de tempo al tempo komencadis turniĝi pro laco, sed ŝi nepre devis ĉirkaŭiri la tutan insulon kaj mem, per la propraj okuloj ekvidi ĉiujn mortintojn.

Ĉe malnova gardista budo Taisja haltis, vokis:

— Ivaĉjo-o-o!

Ŝia forta voĉo dronis en malproksima tondrado de kanonoj.

— Ivaĉjo-o-o! — pli laŭte vokis ŝi.

Kanonoj nun silentis, kaj en la silento ŝi kvazaŭ aŭdis respondan vokon aŭ ĝemon.

Enfalante ĝis la genuoj en marĉo, kolektinte ĉiujn fortojn, ŝi ekkuris al la bordo, al salikaro. Por momento ŝi ektimis, sed ŝi superis la timon kaj disigis per la manoj densajn branĉojn de saliko. Ĉi tie, sur arbostumpoj, sur trunkoj kaj radikoj, amasigitaj de la fluo de la rivero, flanke, maloportune kuŝis homo en mallonga ruĝa malseka kaftano kaj atente rigardis al ŝi per grizaj okuloj...

— Ne timu! — diris li per firma voĉo. — Ne timu min. Mi ne estas malamiko por vi, mi estas rusa, sed ne sveda homo. Helpu al mi leviĝi kaj ekvidi vian estran oficiron. Mi devas hasti, ĉar la fortoj forlasas min, kaj estas tre probable, ke mi baldaŭ mortos...

Taisja aliris al li pli proksime, surpaŝis balanciĝantajn sur akvo trunkojn, li alkroĉiĝis al ŝia mano, sed ne sukcesis ekstari kaj kulpe ridetis, kiel ridetas fortaj kaj kuraĝaj homoj, konvinkiĝintaj pri propra malforteco.

— Mi perdis multan sangon, — kvazaŭ ekskuzante sin, diris li. — Sed ne gravas! Ankoraŭ foje helpu min...

Taisja ree etendis al li la manon, li kunpremis la dentojn kaj ekstaris sur la piedojn. Kune ili trairis la marĉan bordon kaj suriris holmon, sed ĉi tie la fortoj tute forlasis lin, kaj, ekĝeminte, li malleviĝis sur malsekan herbon. Taisja staris super li, kompatante, kaj ne sciis, kion fari. Li estis mallonge kaj ofte spiranta.

— Ne! — diris la nekonato. — Tiel ne estos. Vi sendos ĉi tien fortajn virojn, kiuj dum mallonga tempo ĝisportos min ĝis

via estra oficiro. Ĉu li estas viva — kapitan-komodoro Ievlev?

Taisja kapjesis.

— Viva, nur vundita...

— Mi nun same estas nur vundita, — subridis la nekonato, — sed baldaŭ povas esti ankaŭ morta. Necesas hasti. Iru! Kaj diru al la kapitan-komodoro mian nomon: Jakobo.

Ŝi ekiris, obeante la forton, kiu sonis en lia voĉo, obeante la obstinan esprimon de liaj grizaj okuloj.

En la fortreso, sur la remparoj, tamburoj batis malalarmon, gaje, jubile, venke intervokadis klarionoj. Taisja demandis, kio okazis, — kuranta pretere matroso kriis per sovaĝa, kvazaŭ ebria voĉo:

— Viktorio! Kapitulacis la svedaj latronoj!

Taisja leviĝis sur la pordegan turon, — Ievlev tie ne estis. Sub pezaj nuboj, ree venintaj de la maro, estis finbrulanta la pobo de «Krono». La pruo de la ŝipo, deŝirita de la eksplodo, jam malaperis sub la akvo. Kaj sur ĉiuj ceteraj ŝipoj de la eskadro vento estis flirtiganta tukojn de rusaj flagoj, kaj videblis, ke tie jam mastras rusaj matrosoj en siaj trikitaj ĉapoj kaj mallongaj jakoj. Kaj laŭ Dvino, al la fortreso kaj al la kaptitaj ŝipoj, tien kaj reen afereme kaj rapide navedis boatoj, liverante sur la ŝipojn rusajn matrosojn, kaj el tie ili transportadis vunditajn kaj kapitulacintaj svedojn.

Sur la remparoj, sur la turoj, ĉe la kanonoj silente staris la kanonistoj, ne kredante, ke ĉio estas finita. Kelkaj viŝadis ŝviton kaj fulgon de la vizaĝoj, aliaj krucosignadis sin, triaj frotpurigadis kanonojn kaj interparoladis inter si per lacaj voĉoj. En la plene malfermitan fortresan pordegon pafistoj

enkondukadis militkaptitojn; la svedoj iris silente, mallevinte la kapojn; iliaj botoj tondris sur pavimŝtonoj.

Silvestron Petroviĉ-on Taisja trovis sidanta sur benko apud la fortresa preĝejo, li estis pridemandanta kaptitan svedan oficiron. Taisja kliniĝis al Ievlev, flustre rakontis pri la homo en ruĝa kaftano. La kapitan-komodoro unue ne komprenis, redemandis, sed tuj ordonis forkonduki la svedon kaj vokis ferdekestron Semisadov-on. Tiu venis, frapante per la lignaĵo. Ievlev ordonis al li kolekti senprokraste ĉi tien, al la preĝejo, matrosojn kun sabroj, soldatojn, pafistojn, tamburistojn, klarionistojn. Kvar homoj kun brankardo ekkuris tien, kien almontris Taisja. Ievlev sendis por kuracisto Loftus, diris al li en la germana:

— Mi ne scias, kia vi estas kuracisto, sed mi ordonas al vi apliki tutan vian arton al tiu homo, kiun oni tuj alportos. Se vi savos lin, via sorto faciliĝos.

Loftus riverencis malalte, alpremis la disŝovitajn fingrojn al la brusto. La matrosoj jam estis alirantaj, zorge kaj gardeme portante la brankardon. Silvestro Petroviĉ kun peno leviĝis. En unu lia mano estis promenbastono, per la alia li apogis sin sur lambastono. La promenbastonon li metis sur la benkon, per la nun libera mano levis la spadon por honora prezento de armilo. Matrosoj kun sabroj ĉe la ŝultroj, pafistoj kun muskedoj, soldatoj kun fusiloj — senmoviĝis, ne komprenante, kiun ili renkontas kun tiaj honoroj. Ievlev mallaŭte demandis:

— Jakobo?

— Jakobo! — respondis la homo en ruĝa kaftano, levetiĝante sur la brankardo.

Silvestro Petroviĉ salutis per la spado, la klarionoj kaj tamburoj batis «al militiro». Jakobo penis eksidi, liaj implikitaj helaj haroj pendis super la frunto, en la okuloj tremis larmoj. Ievlev kliniĝis al li, ekparolis mallaŭte, retenante emocion:

— Saluton, amiko bona. Mi ricevis pri vi leteron de sinjoro Izmajlov. Nun vi ripozos, morgaŭ ni parolos pri ĉio longe. Ĉu vi estas vundita?

Jakobo respondis trankvile:

— Mi supozas, ke vundita morte. Nun mi volas diri nur pri tio, ke mi havis honoron vidi, kiel estis farita granda heroaĵo de la piloto, kiun mi ekkonis kaj anime ekamis dum nelonga tempo. La flagŝipo «Krono» estis surgrundigita de ĉi estiminda kavaliro antaŭ miaj okuloj. Svedaj oficiroj kaj matrosoj penis tuj mortigi la piloton, sed li kuraĝe rezistis kaj faris nemalmultajn batojn al la svedoj per sia forta mano, armita per hakilo. Li sukcesis salti el la ŝipo en la akvojn de la rivero, kaj mi ne plu vidis lin... Gloro al li eterna!

— Gloro! — ripetis Ievlev.

La matrosoj levis la brankardon, ekportis Jakobon al la domo de Rezen — nur la domo de la inĝeniero ne suferis pro svedaj kuglegoj. Maria Nikitiŝna brakumis Taisja-n je la ŝultroj, restis kun ŝi sidi sur la benko apud la preĝejo. Post la brankardo hastis Loftus, diradis vortojn de konsolo, afablaĵojn, fanfaronis pri sia arto.

Antaŭe frapadis per la lignaĵo Semisadov, kriadis de tempo al tempo:

— He, for de la vojo, kristanoj! Devojiĝu!

Pafistoj, kanonistoj, soldatoj, monaĥoj, fortresaj laborantoj

jam deiris de la remparoj, lasis gardistejojn, pordegojn, turojn; ili amasiĝis sur la placo, ripozis post la batala laboro, manĝetis sub la fortresaj muroj, apud detruitaj kaj forbrulintaj domoj kaj tenejoj, sur la preĝeja perono, intervokadis:

— He, kaporalo, ĉu vi estas viva?

— Jes, iel-tiel viva...

— Sed oni diris — via kapo estis deŝirita.

— La mia estas alkudrita firme...

La placo bruis, kiel foiro, soldatoj jam elrulis el keloj barelojn kun vodko kaj medo, ĉiam pli laŭta iĝadis rido, pli salaj iĝadis ŝercoj. Apud la detruita de kuglegoj fortresa banejo kanonistoj estis regalantaj kaptitan svedan kanoniston per vodko kaj biskotoj. Li estis avide trinkanta kaj manĝanta. La kanonistoj ridis:

— He, fraĉjo, ĉi vi prenis la Arĥanĝelan urbon?

— La edzino, verŝajne, ploras, malĝojas, ĉu? Ĉu vi havas edzinon?

— Li estas juna, promeni al ni venis, por riĉo...

La svedo kapjesadis, stulte ridetadis, feliĉa, ke li estas viva, ke nun oni ne mortigos lin.

La monaĥoj, drinkinte, iris al Ievlev peti ne peli ilin en la monaĥejon. Silvestro Petroviĉ, metinte la vunditan kruron sur la benkon, sidis apud la kelo, kie dum la batalo li kaŝis la filinojn kaj la filon de Rjabov Ivaĉjon. Barsanufo riverencis, Ievlev demandis:

— Sed kion do vi ĉi tie faros?

— Festenos ni, sinjoro kapitan-komodoro, iomete...

— Ĉu en la monaĥa stato? — ridetante, demandis Ievlev.

Barsanufo glatigis la soldatajn lipharojn, tusis en la pugnon. La aliaj monaĥoj same tusis. Semisadov diris:

— Kaj kio, Silvestro Petroviĉ, eble ni lasos iujn en la citadelo...

Malantaŭ la kelo fortaj virinaj voĉoj komencis kanton, ĝi ekflugis super la fortresa placo, super la remparoj, super la turoj, super kvieta Dvino — brava, laŭta, festa:

Brando, brando, mia brand',
Ebriiga mia brand',
Forta brando, maltigita...

En la fortresa pordego kun tondro furioze ekbatis tamburoj, venke ekkantis klarionoj. La homoj leviĝis sur la piedojn, la homamaso ĵetiĝis al la vojo — rigardi, kiel oni portas standardojn de la svedaj kaptitaj ŝipoj. Pafistoj, soldatoj, matrosoj, ĵetante ĉapojn supren, kriis:

— Gloro!

— Bone!

— Hu ra-a-a!

La homamaso premis, la antaŭaj, kunkroĉinte la manojn, ne lasadis tiujn, kiuj estis malantaŭe, alie la popolo ĉifus la tutan procesion. La tamburoj batis ĉiam pli forte, ĉiam pli proksime al Ievlev. Li ekstaris, apogante sin per la mano al la muro de la kelo, la filinoj kaj Ivaĉjo grimpis kun la piedoj sur la benkon apud li, per brulantaj okuletoj rigardis al Jegorĉjo Pustovojtov, kiu kun spado, etendita antaŭen, estis egalmezure marŝanta sur

pavimo, pala, kun solene severa vizaĝo. Post li vice paŝis kvar tamburistoj, post la tamburistoj iris klarionistoj — ludis «kunvenon». Poste iris la sola saviĝinta dogana soldato Stefano Smirnoj, brulvundita, kun brako sur skarpo, — li portis la poban flagon de la kaptita ŝipo. Post li matrosoj, retroklininte sin, alte ĵetante la piedojn, portis flagojn de aliaj ŝipoj de la sveda eskadro — vimplojn, pruajn kaj mastajn flagojn.

Je du paŝoj de Silvestro Petroviĉ Jegorĉjo haltis, kunfrapis la kalkanumojn, levis la spadon super la kapo, diris per rompiĝanta, sed laŭta voĉo:

— Sinjoro kapitan-komodoro! La flagoj de la kaptitaj svedaj ŝipoj, en honesta batalo de ni akiritaj — pruaj flagoj, vimploj, flagetoj, — estas liveritaj en la Novdvinan citadelon, en viajn manojn, ĉar vi estas la supera mara estro kaj komandanto super la fortreso!

Al Ievlev tremeris la vizaĝo. Per mallonga ekzakta gesto li almontris antaŭ si la pavimon:

— Sternu ĉi tie!

Doganisto Smirnoj larĝe svingis la stangon, la blua kun oro tuko de la poba flago, faldiĝante, kuŝiĝis sur la ŝtonojn. La matrosoj eliris antaŭen, ĵetis sur la pavimon pruflagojn, flagetojn, vimplojn[116]. Silvestro Petroviĉ, kuntirinte la brovojn, klare ordonis al Semisadov:

---

116 La sceno tre multe asociiĝas kun la Parado de la Venko de 1945 en Moskvo, kiam standardoj kaj flagoj de la venkita nazia Germanio estis ĵetitaj sur la pavimon de la Ruĝa Placo. Mi opinias, ke tio estis la intenco de la aŭtoro. La filmita sceno de tiu parado estis konata de probable ĉiu sovetiano kaj rusiano, kaj la asocio estis tre facile divenebla por ili. Sed por alilandaj legantoj mi deziras speciale substreki tion. *(trad.)*

— Prenu Ivaĉjon, ferdekestro!

Semisadov prenis la etan Rjabov-on sur la brakojn, glatigis liajn harojn per la aspra kala polmo, ĵetis demandan rigardon al Ievlev. Silvestro Petroviĉ kapmontris al la flagoj, kovrantaj la teron. La ferdekestro, diveninte, paŝis antaŭen, per la fortaj manoj alte tenante Ivaĉjon, kvazaŭ montris lin al la popolo; poste per unu movo starigis la knabon per la fortikaj piedetoj en ferumitaj botetoj sur la bluan silkon de la flagoj kaj vimploj. La homamaso suspiris per unueca feliĉa suspiro, fiŝistaj vidvinoj kaj edzinoj, patrinoj kaj fratinoj, viŝante larmojn, etendis la kolojn por ekvidi la orfon; kampuloj, soldatoj, matrosoj ekkriis, ekparolis ĉiuj samtempe:

— Gloro!

— Bone!

— La knabo de Rjabov!

— Ni ŝatas, ŝatas! Vi prave faras, kapitan-komodoro!

— Kiu la ŝipon sur malprofundaĵon sidigis — de tiu estas la orfo!

— Bonon al li.

La popolo bruis, kvazaŭ maro en ŝtorma vetero, premadis la matrosojn, kiuj ĉirkaŭis la svedajn flagojn, la voĉoj iĝadis ĉiam pli laŭtaj, pli fortaj.

— Plaĉas tio, plaĉas!

— Gloro!

Ivaĉjo staris iom sur la silkoj, ĝeniĝis, ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ kutimiĝante, poste, ne sciante, kien kaŝi la manojn, ŝovis ilin sub la broditan zoneton de la malpurigita en la

incendio ĉemizo kaj ekiris sur la flagoj, sur la blua kun oro silko, ekiris al tiuj, kiuj batalis dum la tuta hodiaŭa tago kontraŭ la svedo, — al fulgokovritaj lacaj kanonistoj, al matrosoj, kiuj kondukis la brulŝipojn al la malamikaj ŝipoj, al terfosistoj, forĝistoj kaj ĉarpentistoj, kiuj konstruis la fortreson kaj batalis egale kun militistoj. Ies fortikaj manoj ankoraŭ foje levis Ivaĉjon super la kapoj, ies ĝoja voĉo kriis:

— Jen li, Rjabov Ivano filo de Ivano! Gloro!

— Gloro! — daŭrigis la popolo.

— Honore kaj minace por eterne! — sensone, per la solaj lipoj flustris la kapitan-komodoro. — Por eterne!

Post lia dorso estis ploranta, ne viŝante larmojn, Taisja.

Parto kvara
Standardo de kvar maroj

Ĉielo estas nun tegmento,
Kaj ŝipo iĝis mia hejm'...

Lermontov

Ĉapitro unua

La caro ne vidas pro palisaro.
Proverbo

La afero iros kiel kancelariano skribos.
Popoldiro

1. Kun raporto al Moskvo

En la domo de Rezen Silvestro Petroviĉ ordonis doni al si inkon, plumon kaj paperon kaj eksidis al tablo — skribi leteron al la caro, sed tuj kiam li zorge skribis la caran titolon, venis la inĝeniero kaj diris, ke estas nova, bona sciigo. Post Rezen videblis ĝuste tiu akranaza serĝento de suboficiro Ĥodiĉenkov, kiu antaŭ nelonge petis de la kapitan-komodoro la kupran kanoneton por la soldatoj, starantaj sur la limposteno.

— Kia bona sciigo? — per elturmentita voĉo demandis Ievlev.

La serĝento paŝis antaŭen, rakontis, ke sveda rajdista taĉmento antaŭ nelonge atakis la Kondušan limpostenon, por trabati sin al Oloneco. Sed suboficiro Ĥodiĉenkov al tiu latronaĵo estis preta, dormadis dum la tuta nuna tempo nur per unu okulo, la popolo sur la limposteno estas ne simpla, la svedojn ili batis firme. El mil homoj vivaj foriris ne pli ol tricent, la ceteraj estas enterigitaj apud rulŝtonego nomata Sorĉisto. Ili enterigadis dum du tagoj, da armilaro akiris multe: kaj fusilojn, kaj spadojn, kaj kanonojn.

— Kaj la vian, sinjoro kapitan-komodoro, ni sendifekte

liveris reen! — finis la serĝento.

Ievlev gratulis la serĝenton kun la viktorio kaj, ordoninte lin trinkigi kaj manĝigi sate, revenis al la letero. Unue li pensis detale priskribi la tutan bildon de la batalo, sed subite eksentis tian malfortecon, ke preskaŭ falis de la benko: en la oreloj subite alte ekkantis flutetoj, antaŭ la okuloj kun neeltenebla zumado traflugis multegaj muŝoj, la plumo elfalis el la fingroj...

— Mi trinkus! — petis Ievlev.

Jegorĉjo donis akvon en kruĉeto, Silvestro Petroviĉ lipis, fermis la okulojn, strikte kaj severe ordonis al si: «Skribu tuj. Poste estos pli malbone!»

Kaj mallonge, sen ajna troa vorto, li skribis al la caro, ke la svedoj estas frakasitaj plene, la ŝipoj estas kaptitaj, al Arĥangelsko ne plu minacas danĝero. En la tuta letero estis sep linioj.

— Ĉu mi veturu? — demandis Jegorĉjo.

— Vi, amiko, — viŝante la ŝvitan vizaĝon kaj suferante pro turmentanta doloro en la vundita kruro, respondis Ievlev. — Ni iru al Maria Nikitiŝna, ŝi ankaŭ monon donos — la vojo ne estas proksima. Se vi faligos ĉevalon — aĉetu alian, flugu kiel sago. Prenu en la citadela korto riparitan svedan kuglegon — vi veturigos al la caro suveniron...

Li ankoraŭ trinkis akvon, koncentrante la pensojn, maltrankvilante forgesi la ĉefan. Jegorĉjo atendis silente.

— Ankoraŭ jen: survoje en Ĥolmogoro unuavice vizitu eminencon Atanazion. La maljunulo estas febla, probable en atendo elturmentiĝis. Al li ĉion rakontu detale, li ĝoju. Eble,

ankaŭ la vojevodon vizitu. En ĉi bonaj horoj pri la antaŭa malhonoro rememori ne indas. Tio pasis — kaj kun Dio!

— Kia malhonoro? — demandis Jegorĉjo.

Ievlev ĵetis al li severan rigardon, ne respondis.

— Ĉu kiel la princo ektimis? — rememoris Pustovojtov. — Ĉu pri tio?

— Tio estas afero ne de via kapo! — abrupte diris Ievlev. — Post la eminenco vi hastu al vojevodo princo Aleksio Petroviĉ. Lin ĉirkaŭiri al ni estas nekonvene. Kun tuta respekto bojaron Prozorovskij-on pri la granda viktorio gratulu. Se li deziros, li ankaŭ mem al la Siro skribu — laŭ la rango. Sed ĉu vi aŭskultas min?

— Mi aŭskultas! — morne respondis Jegorĉjo.

Li prenis la sigelitan per vakso leteron, envolvis en tukon. Silvestro Petroviĉ balancis la kapon:

— Sed kiel vi estas malpura, Jegoro. Kaj malpura, kaj ŝirita tuta...

— Tio estas pulva fulgo! — per ofendita voĉo diris Jegorĉjo. — Kaj kaftanon alian mi ne havas, kiu sur mi estas — estas la plej bona...

— Ĉio mia ja forbrulis! — diris Ievlev kaj ordonis al Rezen doni al Jegorĉjo ion por ŝanĝi veston. La inĝeniero elprenis el la kofro belan kaftanon, mallongan pantalonon, bonkvalitan mantelon.

Jegorĉjo eliris el la domo de Rezen, pririgardis la mantelon, venis al Maria Nikitiŝna por la mono, ekpaŝis al la albordiĝejo. Juna matroso metis en lian velboaton riparitan svedan

kuglegon. La velboato debordiĝis de la fortreso. La koro de Jegorĉjo batis puŝe, forte, al li estis varmege, li deziris rakonti al ĉiuj, ke li jam hodiaŭ veturas en Moskvon al Siro mem Petro Aleksejeviĉ — veturigas raporton pri la viktorio super la svedoj. Sed paroli li ne rajtis...

Arĥangelsko renkontis Jegorĉjon per gaja sonorilado, — en sonorilejoj restis nur malgrandaj sonoriloj, ili sonoris alte, pro tiu sonoro al lia koro iĝis tute bone. Ĉie — en stratoj kaj stratetoj, sur la Resurekta kajo, apud la Komerca korto — tumultis metiistoj, ankoraŭ kun tranĉiloj, kun arkebuzoj, kun muskedoj — iris ripozi. Laŭ Dvino per remiloj unu post alia moviĝadis velboatoj kaj barkoj de tiuj ĉasistoj, kiuj sidis en embuskoj, aranĝitaj de forpasinta Krikov. La ĉasistojn renkontadis la edzinoj kun pirogoj, kun stofoj, kisadis la edzojn, riverencadis al ili. Kaj apud kanonoj bruis blankharaj knaboj, frapadis la tubojn, penadis levi pezajn skovelojn, timigadis:

— Jen mi pafos!

Ĉevalon Jegorĉjo prenis el la ĉevalejo de la Sepurba domo, eksidis en la selon, alligis al ĝi la kuglegon, alrajdis la barieron. La gardistoj, rekoninte Pustovojtov-on, demandis, por kia neceso li forveturas el la urbo. Ĉi tie Jegorĉjo ne eltenis, diris kvazaŭ senintence:

— Al Moskvo — de la kapitan-komodoro kun raporto al la Siro pri la viktorio.

La pli aĝa gardisto demetis la ĉapon.

— Nu, donu Dio! Eble, rekompencos vin la caro-patro. En la antikvaj tempoj tiel okazadis: kiu bonan sciigon alveturigas

— al tiu estas rekompenco, kaj kiu ion pli malbonan, tiun oni povis aresti...

Aliaj gardistoj ekridis:

— Aresti? Tro, frato, milde: tiam oni pli severe faras...

— Ja sendube la kapon for...

— Kaj sur palison...

La maljunulo suspiris:

— Tio estas vero: apud la caro — apud la morto. Provu, divenu! Nu, tamen por Jegorĉjo la afero estas senduba. Ankoraŭ okazas, demandas la caro — kion vi pro via bona sciigo bezonas. Tiam, Jegoro, tuj respondi hastu. Se vi prokrastos — sen rekompenco restos. Ĉu vi scias, kion peti?

— Mi scias! — firme respondis Jegoro.

— Vi duonon de la regno petu! — diris el malproksime blonda gardisto. — Duonon de la regno, kaj al ĝi caridinon aldone...

— Ŝerculoj! — eldiris la maljunulo. — Ne caridinon li bezonas, sed bovinon kaj ŝafojn en la korton. La domo ja tute, mi pensas, kadukiĝis...

La gardistoj kun rido levis la stangon, Jegoro elveturis el Arĥangelsko. Kaj tuj en sia imago li ekvidis sin ne en densa ĉedvina pinarbaro, sed en Moskvo, en la caraj ĉambroj. Jen iras al li renkonten Siro Petro Aleksejeviĉ, legas la raporton, kisas Jegoron kaj demandas, per kio lin rekompenci. Kaj Jegoro respondas:

— Metu min, sinjoro bombardisto, en la navigistan lernejon, kiu estas en la Suĥareva turo. Mi lernos kun tuta penemo kaj

diligenteco kaj iĝos estro de granda kvindekkanona ŝipo.

Batas tamburoj, trumpetas klarionoj, kaj Jegorĉjo sur ĉevalo enveturas en la navigistan lernejon... Grandegaj pinoj staras en la navigista lernejo, ne aŭdeblas homaj voĉoj, ne videblas lernantoj... Aĥ, jen kio! Tio estas ne la lernejo. Tio estas la pinaro, — ne ĝisveturis Jegorĉjo la navigistan lernejon. Ekdormis en la vojo pro laco. Sed ne gravas, li ĝisveturos. Nepre ĝisveturos...

Ĉe tagiĝo Jegorĉjo atingis Ĥolmogoron. La bieno de mastro Atanazio mirigis lin per nevidita senhomeco: kvazaŭ formortis diversaj servoj, super la episkopa kuirejo ne videblis fumo, sur la korto ne tumultis, kiel ĉiam, subdiakonoj, monaĥejaj panistoj, brandistoj, fiŝistoj, kaligrafoj, arĝentistoj, kandelistoj, dikaj episkopaj kantoroj...

— Kio ĉe vi okazis? — demandis Jegorĉjo palan, kun mallevitaj okuloj, serviston.

— Ke ni senhomiĝis?

— Neniu videblas ja...

— La mastro ĉiujn al Arĥangelsko sendis — svedajn militistojn bati. Li mem, per siaj manoj lancojn disdonadis, halebardojn, sabrojn, muskedojn, mem ĉi tie ekzercojn en la korto aranĝis. Kiel centestro super ili iris nia sakristiano patro Makario...

Jegorĉjo deziris ridi, sed retenis sin, ne montris tion, nur viŝis la buŝon per la polmo. La servisto per rapidaj paŝoj iris en la ĉambrojn, revenis, diris:

— Atendas vin la mastro!

Atanazio staris en sia dormoĉambro, apogante sin per la maldika mano al la litpiedo. Li estis en longa blanka subĉemizo, kun noktoĉapo sur la grizaj haroj, maldika, nerekoneble ŝanĝiĝinta dum tiuj ĉi tagoj.

— Nu? — kriis li. — Kial vi silentas? Ĉu la lango forsekiĝis?

— Viktorio! — per plena, profunda voĉo proklamis Jegorĉjo. — Plene frakasita estas la svedo. Finita la latrono!

La mastro plorsingultis, volis ion diri kaj ne sukcesis. Longe daŭris la silento. Jegorĉjo pensis, ke Atanazio malleviĝos nun sur la genuojn kaj komencos preĝi, sed la maljunulo, anstataŭ preĝo, subite riverencis kaj diris:

— Dankon al vi, nepo. Nun eĉ morti iĝos pli trankvile. Malsanas mi — maljuneco min venkis, antaŭ nelonge intencis mi veturi al vi en la citadelon, sed fortoj mankis.

Kaj li komencis demandi pri detaloj de la batalo, kaj tiel inteligente, ke Jegorĉjo miris — eblis pensi, ke la mastro en antaŭaj tempoj militis. Kaj kiam Jegorĉjo, kun deco, konforma al la loko kaj al la rango de Atanazio, rakontis, ke svedoj estis batitaj en granda kvanto kaj iliaj korpoj ĝis nun flosas sur Dvino, Atanazio sen ajna humileco en la voĉo sakris:

— Nu do tiele ilin kaj tiele! Ĉu ni vokis ilin al Arĥangelsko, lupajn idojn?

Iom poste li demandis:

— Ĉu la vojevodon vi sciigis pri la viktorio?

— Mi tuj al li iros! — respondis Jegorĉjo.

— Saĝe! Ne necesas nun kun li kvereli. Li estas malutilema,

hundaĉo, multajn fiaĵojn kapablas fari, firman manon sur la pinto mem li havas. Gardu vin de li, infanoj, de la blasfemulo damnita, kalumnianto, denuncisto...

Jegorĉjo kun mirego ĵetis rigardon al Atanazio — kion li diras pri la princo-vojevodo. Tiu, kvazaŭ diveninte la pensojn de Jegorĉjo, klarigis:

— Timas mi, infano, bonkorecon de la kapitan-komodoro. Li estas flamiĝema kaj bonkora nekonvene. Nun kun la granda viktorio li al la malbona pasinteco svingos la manon, sed ĉi serpentoj, mi pensas, ne forgesos, per la dentoj ili ĝis nun grincas. Eksidis, kanajloj, ĉi tie en Ĥolmogoro — kaj ĉiuj tri kancelarianoj, kaj la dumaano, anatemulo, kaj la latrona vojevodo mem, ankoraŭ kun iu fuĝinta oficiro. Prozorovskij, oni diras, dum tago kaj nokto brandon drinkas, ĝis deliraj vizioj. En ĉi nokto li nudpieda kaj nudkorpa sur la korto ĵetiĝadis, malhonoro por tuta najbaraĵo. Por tio mi pri tio rakontas, ke vi gardu vin en lia domo...

— Sed kiel do gardi min? — perplekse demandis Jegorĉjo.

— Estu pli humila, riverencu pli malalte, la kolo ne rompiĝos... Nu, iru, nepo, iru, infano, laciĝis mi, kuŝiĝos. Iru kun Dio...

Li benis Jegorĉjon, kuŝiĝis. Jegorĉjo eliris. La servisto akompanis lin ĝis la barilpordeto, flustris funebre:

— Tute malfortas nia avo. Ho, Dio!

Ĉe la domo de la vojevodo plu estis pasumantaj la gardistoj, destinitaj de Silvestro Petroviĉ. La kvindekestro impetis renkonten al Jegorĉjo, tiu, sidante en la selo, mallonge rakontis pri la venko super la svedoj. La soldatoj amasiĝis ĉirkaŭ

Jegorĉjo, avide demandadis, li respondadis kun detaloj, kiel surgrundiĝis la flagŝipo «Krono», kiel en ties pobon batis la fregato, kiel eliris la brulŝipoj, kiel per ŝipatako oni kaptis la jaĥton. La kvindekestro demandis:

— Eble, ni al Arĥangelsko iru? Kion ni plu faru ĉi tie? La vojevodon, mi pensas, neniu nun ofendos, finita estas la svedo.

— Ĉu plu malsanas la princo? — demandis Jegorĉjo.

— Drinkuliĝis tute! — ridante, respondis la kvindekestro. — Antaŭ nelonge sur la tegmenton grimpis — kokerikis. Eĉ rigardi al tio estas hontinde...

— Do, iru! — diris Jegorĉjo. — Kaj vere ĉi tie ne plu estas kion fari. La sekvantaro vojevoda estas ĉe li: kiu lin tuŝos?

Li deĉevaliĝis, frapis per la rajdovipo al la pordego.

Sur la perono de la bojara domo Jegorĉjo preskaŭ kunpuŝiĝis kun Meĥonoŝin. Tiu retropaŝis en la vestiblon. Jegorĉjo paliĝis, pli firme kunpremis en la mano la vipon, dise diris:

— Jen kie vi estas, sinjoro leŭtenanto.

— Sed kie mi estu? — same paliĝinte, demandis Meĥonoŝin.

— Ĉu vi vere ne scias?

— Mi ne scias, instruu! Forgesis mi iel...

— Jam, kiam oni pendumi kondukos — vi rememoros!

— Ĉu min pendumi?

Jegorĉjo, ne respondante, eniris en la vestiblon, ordoneme malfermis la pordon. Renkonten, mole paŝante, ĵetiĝis

kancelariano Gusev, flustris, elspirante ajlon:

— Dormas ankoraŭ la princo-vojevodo! Malforta... Tiom grandaj estas malsanoj...

— Veku! — ordonis Jegorĉjo. — Mankas al mi tempo.

— Neniel estas permesite! — riverencante ripetadis la kancelariano. — Li estas severa, rapide punema...

— Atendi mi ne povas! — diris Jegorĉjo. — Mi veturas al Moskvo kun raporto al la Siro...

La kancelariano ektimis, ekkuris sur knarantaj plankotabuloj — al la vojevodo. Jegorĉjo eksidis sur benkon, enpensiĝis. Tra la ĉambro per larĝaj paŝoj, kvazaŭ ne rimarkante Jegorĉjon, trairis Meĥonoŝin. Frapis unu pordo, poste alia. Desupre, de la ŝtuparo al Jegorĉjo rigardis la maljunaj fraŭlinoj-princidinoj, malaprobante, ke li ne riverencas, ne demandas pri la sano. Princido Borĉjo aliris pli proksime, metis la manojn post la dorson, interesiĝis:

— Ĉu vere viktorio estas?

— Kaj kiel tio vin koncernas? — bruske demandis Jegorĉjo.

— Tiel, ke mi estas vojevoda filo! — brustoŝvelis la princido.

— Blato vi estas subforna, sed ne vojevoda filo! — respondis Pustovojtov. — Hontu demandi.

La maljunaj fraŭlinoj ekflustris, riproĉante Jegorĉjon, ke tiu ne scias *chevalier*-econ, ne estas instruita pri *plaisir*, certe, same kiel la ceteraj Ievlev-aj, estas filo de tolaĵlavistino. Jegorĉjo sidis, rigardante flanken, frapetante la kruron per la vipo.

En la domo ĉiam aŭdeblis moviĝado, kuradis servistoj, portadis al la vojevodo maceritan oksikokon, peklakvon, raspitan krenon, bieron por refreŝiĝi post drinko. Desupre fojfoje aŭdiĝadis minaca graŭlado, admonanta voĉo de Meĥonoŝin. Post la dorso de Jegorĉjo knaradis pordoj, plankotabuloj, interpalpebrumadis la hejmanoj. Ŝajnis, ke la tuta bojara servistaro interkonsentas pri io. Al Jegorĉjo tedis, li diris al maljuna nanino:

— Vi, oldulino, saltu pli rapide, kiom mi povas atendi?

La nanino ŝrikis per vira voĉo, transkapiĝis, malaperis en krepusko de la vojevoda polva domo. Tuj venis dumaano Larionov, sen riverenco, severe, kvazaŭ arestiton, kondukis Jegorĉjon laŭ ŝtupoj supren en la ĉambron. La vojevodo sidis retrokliniĝinte en fotelo, lia vizaĝo estis griza, ŝvela, la okuloj apenaŭ rigardis, la frunto estis ligita per tuko kun raspita kreno. Dumaano Larionov eksidis sur benkon, ekfiksrigardis Jegorĉjon per la akraj okuletoj, komencis balanci la piedon en mola marokena boteto. Post la dorso de la vojevodo estis mordetanta la lipojn leŭtenanto Meĥonoŝin. Pli malproksime estis interflustrantaj la kancelarianoj. Jegorĉjo riverencis al Prozorovskij, transdiris, kio estis ordonita de Silvestro Petroviĉ. La vojevodo per malcerta voĉo, malbone movante la langon, demandis:

— Ĉu Ievlev via kaj kaj Krikov estas kompanoj?

— Kiel — kompanoj? — ne komprenis Jegoro.

— Ĉu de la sama speco?

Meĥonoŝin plu lekadis kaj mordetadis siajn lipojn, aŭskultis, kaŝante rigardon. Larionov balancadis la piedon, rigardis

malkonfide, kvazaŭ prepariĝante al io.

— Rjabov kaj Krikov estas kompanoj, — daŭrigis la vojevodo, — tion mi scias. Krikov kun la kapitan-komodoro, probable, same ribeligajn foliojn legadis, per unu sama gudro ŝmiritaj latronoj, unu saman kovardan aferon entreprenis...

Jegorĉjo, streĉiĝinte, paliĝinte, interrompis la vojevodon:

— Ĉi insultajn vortojn, princo-vojevodo, por mi aŭdi estas neelteneble. Mi por afero al Moskvo estas sendita kaj devas esti tie sen ajna prokrasto...

— Ĉu vi?

— Mi, princo-vojevodo!

— Sed vi estas de kia deveno?

Jegoro, kuntirinte la brovojn, antaŭsentante malfeliĉon, respondis, ke lia deveno estas simpla. Tiam per alta voĉo, kvazaŭ legante libron, la dumaano diris, ke ne konvenas al li, malnoblulo, kampula filo veturi por stari antaŭ la helaj caraj okuloj. Veturos al Moskvo alia homo, de nobela deveno, kaj al Jegorĉjo estas ordonite de la vojevodo sidi ĉi tie, en Ĥolmogoro. Jegorĉjo flamiĝis, kriis, ke al li estis ordonite iri de la kapitan-komodoro mem. Tiam antaŭen eliris Meĥonoŝin, mallarĝigis la okulojn:

— Donu la leteron!

— Ĉu al vi?

— Al mi!

— Sed kiu vi estas ĉi tie?

— Tiu, ke por vi mia ordono estas leĝo!

La vojevodo ion muĝis, same etendis la manon por la letero... Jegorĉjo, malbone komprenante, tremegante pro furiozo, elkuris en la korton — al la ĉeval-alligejo.

Lia nigra virĉevalo ĉi tie ne estis.

Iuj servistoj en manteloj, grasaj, fortikaj, hirtaj, estis ludantaj ĵetkubojn apud la ĉeval-alligejo. Insultante, Jegorĉjo demandis, kie estas lia stalono, kien la ŝtelistoj forkondukis la virĉevalon, por kio faras malbone? La servistoj, interridante, ne respondis. Tiam li kaptis la plej fortikan je la kolumo, skuis, starigis antaŭ si, sed tuj de malantaŭe oni batis lin sub la genuojn, kaj li falis dorsaltere — en la amason de la servistoj. Kelkaj servistoj surfalis lian bruston, aliaj la piedojn. Li perdis la konscion.

— Pli facile, pli facile! — diris Meĥonoŝin. — Ĝismorte ja ne necesas. Prenu, ĵetu lin en la kavon, kie Longinov enuas, duope por ili estos pli gaje.

La servistoj prenis Jegorĉjon je la piedoj kaj la manoj, ekportis en la ĝardenon; tie sub kverko estis fosita kavo kun kovrilo el feraj strioj. Apud la kavo Jegorĉjon oni metis sur la teron. Meĥonoŝin kliniĝis super li, serĉis en liaj poŝoj, trovis la leteron de Silvestro Petroviĉ al la caro kaj revenis al la vojevodo. Prozorovskij estis staranta ĉe la fenestro, oĥadis, forblovadis de biero ŝaŭmon, trinkis per etaj glutoj.

— Nun por ni revena vojo ne estas, princo! — diris Meĥonoŝin. — Se ni komencis la aferon, necesas sen timo ĝis la fino fari...

— Ne estu nur malfeliĉo! — alpremante per la mano la tukon al la frunto, oĥis Prozorovskij. — Tro kuraĝe ni

komencis, pereos ni, leŭtenanto...

— Pli malbone ne estos! — grave prononcis Meĥonoŝin. — Kaj se ni kun saĝo faros — nenio malkovriĝos. Mi mem veturos al Moskvo, ĉion al la granda Siro rakontos pri vi unuavice. Ni mem pri ni pensu, aliaj ja ne helpos.

Prozorovskij sidiĝis sur la benkon, eklamentis:

— Kapo mia turniĝas, ĉio rondiras, je Dio, la mondo min timigas...

— Drinki nun necesas malpli! — firme diris Larionov. — Ne ŝercan aferon ni entreprenis, pensu nemalmulte pri tiu afero, princo... Regimentoj iras desupre, — eble, tiuj regimentoj ankoraŭ servos al vi. Ili malfruis por kontraŭ la svedo batali — tio por vi, princo, estas profita. Kaj ĉesu oĥi, alie mi eĉ ne parolos plu, kvazaŭ al surdulo...

Prozorovskij ektimis, kaptis la dumaanon je la mano:

— Vi min ne forlasu. Mi laŭ vi, laŭ vi, kara! Ĉion mi faros, kion vi al mi konsilos. Ne koleru, kara. Eksidu kun mi. Mi drinkus vodkon gdanskan nur iomete, por la kapon purigi. Ĝi doloras, krevas...

Meĥonoŝin laŭte, kvazaŭ mastro en la domo, vokis serviston, tiu alportis vodkon, la leŭtenanto mem verŝis por la vojevodo. La princo refreŝiĝis, ordonis legi la leteron de Ievlev al la caro. En la letero ne estis eĉ vorto kaj pri Meĥonoŝin, kaj pri la vojevodo, kaj pri Larionov.

— Eble, estas kaŝe skribite? — demandis Prozorovskij. — Ekzistas tia inko, nenio videblas, sed se varmigi sur kandelo — aperos vortoj. Tio estas sekreta skribo, mi scias, aŭdis. Varmigu sur flamo...

Larionov varmigis super kandelo, sekretaj leteroj ne aperis. La vojevodo mem prenis la paperon, turnis, flaris, — plu ne kredis, ke en la letero ne estas denunco pri li. Kaptinte sian kapon, Prozorovskij kriegis:

— Por kio ni tiel faris? Li pri mi eĉ ne skribas malbonon! Nun ni pereos, — la kurieron ni ligis, por kio tiel stulte...

Kriegante, insultante, li ekfrapis per la pugno kontraŭ Meĥonoŝin kaj Larionov. La dumaano leviĝis de la loko, ĉitis al li, kiel al hundo:

— Ĉit! Por tuta Ĥolmogoro bruon vi levis! Ĉu ne estas skribite pri ni en la letero? Sed la kuriero ĉion per vortoj transdirus, ĝuste por tio li estis sendita, ĉu ne povas vi kompreni, vojevodo? Ĉesu kluki! Ĉi tie estas afero ruza, pensi necesas, kiel tiun Ievlev-on rebati...

— Ja mi same... Kiel?

— Silentu. Aŭskultu, kion mi diros. Ĉu mi al vi pri Krikov kaj pri ĉi Silvestro vane diris antaŭ nelonge? Necesas Ievlev-on firme al ĉi ŝtatkrimulo alligi, — estas bone, ke tiu mortis kaj ne povas paroli. Necesas, ke ili ambaŭ iĝu por la Siro mortaj malamikoj. Vi insistu pri tio firme — li vin kredos, ekde Azovo mem kredas, vi por li estas fidela servanto, bona sklavo, kaj pri Silvestro kion li scias? Al Ievlev necesas morte bati. Jegoron, la kurieron, ni kaptis — bone! Li estas juna: kiam lin Pozdjunin sur pendigilo levos — ĉion, kion ni bezonas, li diros. Al la Siro tiujn torturajn foliojn kun kuriero ni sendos. Kaj dume ni mem skribos, kion Krikov depoziciis, ne gravas, kio estis, la mortinto al ni ne malhelpos. Vi, princo-vojevodo, sidu kviete, silentu, mi kaj sinjoro leŭtenanto ĉion kiel necesas faros, estos bone... Eksidu, leŭtenanto, klopoda tempo al ni

venis, ni konversaciu, per kio komenci...

Meĥonoŝin eksidis, verŝis por si vodkon, eltrinkis. Dumaano Larionov parolis per glata, firma voĉo. La princo aŭskultis lin silente, palpebrumante, krucosignadis sin, suspiradis...

2. Ne trovis la rudriston...

Laborantoj de la Marka insulo garde depuŝis la boaton de la malkruta bordo. Silentulo kaj alia nekonata kampulo ekpremis la remilojn, la ŝipeto kun la korpo de Demĉjo kviete ekiris laŭ kalma, glata Dvino.

Taisja korektis la mortotukon, per kiu estis kovrita Demĉjo, rigardis al lia severa vizaĝo. Silentulo nelaŭte demandis:

— Ĉu edzo estis por vi Ivano Sabateiĉ?

— Edzo.

— Konis mi lin. Ni kune ŝipojn en Solombalo konstruis.

— Antaŭ longe tio estis.

— Antaŭ longe. Spertis ni tie suferojn. Kaj li, forpasinta Metrio, kun ni laboris. Kiom da jaroj pasis, sed mi plu memoras...

Forte preminte la remilojn, Silentulo el sub la severaj vilaj brovoj ekrigardis al Taisja kaj diris obtuze:

— Eble, eĉ estas pli bone por Metrio, ke li mortis.

— Pli bone? — miris Taisja.

— Sed ĉu vi pensas — paciĝos la vojevodo kun tio, ke rudristo via kaj interpretisto Goroĵanin la urbon savis, kiam li, vojevodo-princo, en Ĥolmogoro kaŝiĝis?

Taisja ne respondis.

— Vidu, kiel! — diris Silentulo. — Kaj vi eĉ ne havas kion diri. Mi antaŭ nelonge kun miaj homoj vian edzon sur la bordo serĉis kaj ĉiam pensis: nu, troviĝos li, kiel tiam ni agu? Ni ja scias: intencas la vojevodo malbonon, sidigis ĉe si en Ĥolmogoro kaŝe sub gardon rudriston Longinov-on, kaj tiun Longinov-on veturigis al li leŭtenanto Meĥonoŝin, judaso! Kaj la edzino de Longinov, Eŭtimia, eltrovema ino, al sia edzo sin trabatis, kaj li al ŝi rakontis, por kio ili lin tenas: la kancelariano skribas laŭ liaj vortoj, kiel Rjabov-on Ivanon filon de Sabateo kaj interpretiston Metrion Goroĵanin-on sur la sveda milita ŝipo Longinov vidis kaj kiel ili fuĝi de la ŝipo ne deziris...

— Ho, Dio! — teruriĝis Taisja.

— Jene, ho Dio! Nur al Dio esperu, li helpos... Atendu!

Kaj li rakontis:

— Antaŭ nelonge ĵetiĝis sur nian Markan insulon svedoj kun muskedoj, kun fusiloj, kun sabroj, multopaj, koleraj — veraj rabiaj lupoj! Kaj kion ni havas? Pugnon kaj hakilon! Kiuj ni estas? Ni estas fuĝintoj, elŝiritaj naztruoj, hakitaj fingroj, nin oni eĉ ne opinias homoj. Sed se ne estus ni — tiuj latronoj kaptus la kanonojn, la kanonistoj kontraŭ ili neniel eltenus! Ni ne lasis! Longe batalis — hakis la svedojn. Nun la viroj sur la insulo diras: ni ne foriros, por ni estos favoro, la kapitan-komodoro forliberigos nin pro nia verŝita sango, ni estos liberaj homoj, pardonitaj. Mi respondas: «Viroj, viroj, kia al vi povas esti favoro, vi estas fuĝintaj servutuloj, vi de via bojaro foriris, vin la princo serĉas, kion atendi nun? Vian aferon vi faris, la svedojn hakis. Dum estas bruo kaj festo, por ni estas ĝusta tempo en arbarojn iri. Kaj ankoraŭ: muskedojn de la svedoj ni

prenis, fusilojn, kuglojn, pulvon, — ni havas, kun kio foriri!» Ne, ne kredas ili min. Sidas, atendas, favoron ili deziras...

Li grincis per la dentoj, diris kun kolero:

— Ili ĝisatendos, kiam la vojevodo soldatojn alpelos — nin en malliberejon preni. Ni scias, kiel tio okazas. Ne la unuan fojon ni favoron atendas...

De la fortresa pordego, ekvidinte la boaton, ekkuris gvatantoj. Ĥagajo Pustovojtov starigis matrosojn, ili levis muskedojn en saluta prezento. En la fortresa preĝejeto morne batis la sonorilo. La boato grincis per la flanko je la albordiĝejo, ĝin oni altiris per hokstangoj, la homoj sur la bordo komencis krucosigni sin, deĵetis la ĉapojn, aŭdiĝis voĉoj:

— Metrio-interpretisto...

— Juna — tute infano...

— Kaj kun li la rudrista vidvino...

— Lin ja oni ne trovis...

Ĥagajo Pustovojtov etendis al Taisja la manon, ŝi eliris sur la bordon. Inĝeniero Rezen diris al ŝi:

— Sinjoro kapitan-komodoro ankoraŭ sendis taĉmentojn, por ke ili serĉu sur la tuta bordo — kaj pli alte kaj pli malalte de la fortreso. Ne indas malesperi.

Taisja silentis. La ĉerkon kun la korpo de Demĉjo sub sonorado de la sonorilo oni ekportis en la preĝejon, tien, kie oni faradis sepultajn diservojn pri aliaj pereintoj en la batalo. Kiel en sonĝo, pensante pri nenio, komprenante nenion, apenaŭ movante la piedojn, Taisja eniris en la fortresan pordegon, staris iom sur la placo, ree ekiris al la domo de Rezen...

3. Loftus, Ripley kaj Swenberg

Apud la perono, kunmetinte la manojn post la dorso, estis pasumanta ebrieta ruĝmuzela, kun flava longa amaso da haroj, kanona majstro Ripley. Finfine el la domo eliris Loftus. Ripley laŭte demandis:

— Kia estas la stato de la malsanulo?

— Por mia bedaŭro, li estas tre malbona! — diris Loftus. — Liaj vundoj estas mortaj. Sed ni esperu al Dia favoro.

La kuracisto prenis la kanonan majstron sub la brako, pasis kun li, diris flustre:

— Mi suspektas, ke ĉi vundito estas ĝuste tiu homo, kiun tiel peneme serĉis en Stokholmo reĝa prokuroro Axel Sparre.

— Ĉu li estas ruso?

— Sendube. Sed ni devas diri alie...

Ĉirkaŭrigardante, li ree ekflustris en la orelon de Ripley. La kanonmajstro atente aŭskultis.

— Sed ĉu li ellasos? — demandis li.

Loftus ree ekflustris. Ripley haltis, enpensiĝis.

— Kuraĝa plano! — diris li.

Duope ili trovis Swenberg-on.

— Tio estas profita al la vojevodo! — flustris Loftus. — Kio koncernas ĉiaspecajn malagrablajn sekvojn, do ni ne atendos ilin. Kun la negocistaj ŝipoj, kiuj baldaŭ levos la ankrojn, ni forlasos la negastaman Moskvion. Ni havas pri kio ofendiĝi, ĉu vere?

Ripley respondis kolere:

— Sed mia mono? Kiu donos al mi mian monon? Mi nemalmulte perlaboris ĉi tie, mi devas ricevi la mian!

— *Sir*, vi perlaboris pendumilon, se diri sincere! — diris Loftus. — Mi scias multe pri vi kaj ne konsilas al vi peti tro altan prezon. Vi servis kaj al Svedio kaj al Anglio, sed malpleje al la rusoj. Tamen, la vojevodo volonte kaj plene pagos al vi, se, certe, nia plano sukcesos.

Ankaŭ Swenberg aprobis la planon de Loftus kaj aldonis de si, ke la interrilatoj de la vojevodo kaj la kapitan-komodoro nun estas streĉitaj ekstreme, ĉar, malgraŭ la tuta triumfo de la plena venko, la vojevodo ĝis nun ne venis en la citadelon.

— Kaj ankaŭ tio estas profita por ni! — diris Loftus. — Necesas agi kiel eble plej rapide...

Triope ili revenis al la domo de Rezen, kaj la kanonmajstro petis la gardiston voki sur la peronon la kapitan-komodoron. Silvestro Petroviĉ longe ne venadis, poste aperis, kondukata sub la brako de matroso. Lia vizaĝo tute griziĝis, videblis, ke li estas elturmentita. Ekvidinte Ievlev-on, Ripley tuj ekparolis per bonkor-minaca, rulada voĉo.

— *Sir*! — diris li. — Certe, ni estas sub via potenco, sed mi dezirus rememorigi al vi, ke la batalo estas finita kaj nenio nun minacas al trankvilo kaj prospero de la belega urbo Arĥangelsko. Vi suspektis nin pri komunikiĝoj kun la kontraŭulo, vi dum longa tempo tenis nin en mallibero, tiu mallibero finiĝis por unu el ni malbone: inĝeniero Georgo Lebanius, la veneciano, mortis pro brulvundoj. Mi esperas, ke vi dividas nian malĝojon. Tio, ke ni estas senkulpaj, estis pruvita per nia konduto dum la batalo: vi mem bonvolis vidi — tamen, tion vidis ankaŭ multaj aliaj, — kiel ni pafadis per

kanonoj kontraŭ nia komuna malamiko kaj faris tion ne malpli bone ol viaj kanonistoj...

— Vi tro longe parolas, *sir*! — lace interrompis Ievlev. — Kion vi deziras de mi?

— Ni deziras de vi, — per jam tute aroganta tono respondis Ripley, — ni deziras de vi nur unu aferon: liberigon! Ni ne plu deziras esti ĉi tie viktimoj de viaj absurdaj suspektoj. Donu al ni ŝipon, kiu transportos nin en Arĥangelskon, por ke ni povu finfine lavi nin, manĝi kaj eksenti nin tiuj, kiuj esti al ni estas destinite de la Plejalta Dio...

Ievlev silentis, rigardante jen al la kanonmajstro, jen al Loftus, jen al Swenberg.

— Do, — finfine diris li en la angla. — Vi ĉion ĉi nemalbone elpensis. Kiam oni aŭskultos vin, tiam vere kompatos. Senkulpaj suferantoj, nek pli, nek malpli. Jen kiaj vi estas, kaj kontraŭ la svedo per kanonoj pafadis, ĉu ne herooj? Bravaj uloj, bone laboris. Sed tamen devos vi dum malgranda tempo ankoraŭ en la citadelo resti. Hodiaŭ mankas tempo, kaj morgaŭ ni parolos detale.

Li forturniĝis kaj ordonis al la matroso forkonduki sin reen en la domon.

— Nu? — demandis Ripley.

— Ni foriros nokte mem! — diris Loftus. — Mi ne pensas, ke tio estos tro malfacila. La venkintoj festas, ili al ni ne multe malhelpos... Tamen, estas ankoraŭ unu maniero...

Kaj kuracisto Loftus turnis sin al la matroso, staranta sur la perono.

— Jen kio, kara mia amiko! — diris li afable. — Ĵus, kiel vi mem aŭdis, sinjoro kapitan-komodoro estis tiel bonkora, ke permesis al ni preni lian barkon, por atingi la urbon. Li parolis en la angla, vi, probable, ne komprenis? Kuru al la homoj, kiuj deĵoras sur la barko, kaj transdonu al ili la vortojn de sinjoro kapitan-komodoro.

La matroso pensis kaj revenis en la domon. Ripley insultis.

— Vi estas kreteno, Loftus! — diris li. — Tuj ni pereos...

En la ĉambro Silvestro Petroviĉ sidis senmove, kliniĝinte super la homo en ruĝa kaftano. Tiu estis rakontanta ion al li duonvoĉe. La kapitan-komodoro aŭskultis atente.

La matroso tusis.

Silvestro Petroviĉ turniĝis al li.

— Pri barko via oni tie parolas, sinjoro kapitan-komodoro, por la urbon atingi, — diris la matroso. — Kvazaŭ vi ordonis...

— Nu, se mi ordonis — do donu la barkon! — pensante pri alio, respondis Ievlev, — kial dekfoje pri la samo paroli...

La matroso eliris.

— Ĉu ni, mi esperas, povas ekveturi? — per certa baso demandis Ripley. — Kion ordonis sinjoro kapitan-komodoro?

— Ekveturu! — respondis la matroso.

— Tiam konduku nin, homo! — ordonis Ripley. — Alie ree necesos zorgigi sinjoron Ievlev-on...

La matroso kondukis la fremdlandanojn ĝis la gardista budo kaj transdonis en la nomo de la kapitan-komodoro ordonon forliberigi ĉiujn tri sur la velboato de Ievlev en la urbon. Kiam

la ŝipeto debordiĝis de la fortreso, Loftus prononcis kun suspiro:

— Iam necesas riski, tio estas neevitebla! Sed nun ja ni estas sekuraj, kion oni ne povas diri pri sinjoro Ievlev.

— Al li estos malbone! — konfirmis Swenberg.

— Ni pri tio zorgos! — aldonis kanonmajstro Ripley. — Li longe ne forgesos nin!

Sur kvietaj Dvinaj akvoj la velboato per remiloj rapide glitis al la urbo.

4. Remezov kaj Noble

La du pafistaj regimentoj, senditaj laŭ la Moskva ukazo el Jaroslavlo kaj Kostromo, tra Vologdo, al Arĥangelsko laŭ Dvino sur barkoj, malfruis kaj venis al Ĥolmogoro tagon post la frakaso de la svedoj ĉe la Novdvina citadelo.

Dragona leŭtenanto renkontis la estrojn de ambaŭ regimentoj sur la albordiĝejo kaj, sakrante, kondukis ilin al la vojevodo. Kolonelo Vilhelmo Noble kaj subkolonelo Remezov, timigitaj de la propra malfruiĝo kaj de la severeco de la renkonto, timide eniris en la riĉajn ĉambrojn de princo Prozorovskij kaj, ne eksidante, interrigardante inter si, afable respondadis la pridemandon, aranĝitan de la kolera dragono. Meĥonoŝin, sidaĉante sur benko, faradis demandojn unu post alia: kial ili tiom rampis, kie drinkis, ĉu ne laŭ sveda instigo venis tiel malfrue, por kio staris dum ok tagoj en Ustjugo Granda...

La kancelarianoj, instaliĝinte ĉe la tablo, estis rapide skribantaj pridemandajn foliojn.

Vilhelmo Noble unue tenis sin vigle, sed post la demando pri Ustjugo Granda subfalis kaj tiel mensogis, ke korpulenta kaj raŭka subkolonelo Remezov nur grakis, kaj la dragona leŭtenanto komencis ridi. Laŭ lia vizaĝo videblis, ke li bone sciis, per kio nome ekmalsanis kolonelo Noble sur la vojo al Arĥangelsko...

— Nu, sufiĉas! — diris la dragono, finridinte. — Hodiaŭ aŭ morgaŭ la princo-vojevodo skribos al Moskvo kurieran leteron, kaj el tie aperos pri vi decido. Al bona rezulto de ĉi narativo mi esperon ne havas. Nun estas milito, pro simila latronaĵo necesas arkebuzi — ekzekuti per mortpafo...

La subkolonelo subite ekscitiĝis:

— Tro rapidas vi, leŭtenanto! Arkebuzi! Viŝu la lakton sur la lipoj, kaj servu kiom mi!

La dragono leviĝis, same komencis krii. Al la krio servisto larĝe malfermis la pordon, eniris la vojevodo, ekinsultis de la sojlo:

— Perfido! Kien ajn mi ĵetas rigardon — ĉie estas spionoj, senditoj, perfiduloj, transfuĝuloj. Al vi kiam estis ordonite veni al la loko? Por kio vi en Ustjugo drinkis, sentaŭguloj? Por kio en Ustj-Vago festenis dum tiom da tagoj? Ĉu por ĝustatempe ne veni? Por ke la svedo venku? Por ke nin ĉi tie ĉiujn la svedoj sabru, kaj la urbon bruligu, kaj min, princon, sur fosto pendumu?

Vilhelmo Noble paliĝis, lian hoknazan, lipharan vizaĝon kovris ŝvitaj gutoj. Remezov palpebrumadis. La afero direktiĝis al malbono. Necesis penti.

— Princo-vojevodo, ne iras hakilo al kolo humila! — kun

malalta riverenco diris subkolonelo Remezov. — Vin ne eblas trompi, vi kaj en Ustjugo nin vidis, kaj pri Ustj-Vago scias. Estis tio, necesas konfesi, indulgu. Kulpas ni, sed ne tiom terure — vi mem pli bone ol ni scias, kiel estas per barkoj tian militistaron tiri. La pafistoj tute elturmentiĝis, du ŝipoj dum la vojo dronis, sep bonajn kanonojn ni perdis...

— Kaj pro la kanonoj vi respondos! — minacis la vojevodo.

— Pardonu! — ree riverencis Remezov. — Ni servos al vi kiel vi ordonos. Se ie estas perfido — sendu, ni tiujn latronojn ne kompatos, kaptos, nia popolo estas batalema...

Prozorovskij suspiris, demandis:

— Sed vi el kiaj Remezov-oj estas? Ĉu ne de bojaro Sabaso Sergejevič parenco?

— Filo, princo! — diris la subkolonelo. — La pli juna de li...

La vojevodo bonkoriĝis, turnis la kapon:

— Fluas, fluas tempo. La pli juna, sed la kapo estas griza... Eksidu, aŭskultu! Eksidu ankaŭ vi, kolonelo. Ne bone ĉe ni ĉi tie estas, ho, ne bone. Ĝuste tial mi koleriĝis, ke mi sola estas jen kun li, la leŭtenanto, malfacile estas al ni, ho, malfacile...

Vilhelmo Noble, demetinte la piedon, apoginte sin sur la genuo per la mano, prepariĝis aŭskulti. Remezov apogiĝis sur la sabra tenilo. La princo longe silentis, kvazaŭ koncentrante pensojn, poste ekparolis svage, malklare, mistere. Finfine, kvazaŭ ekfidinte en ĉio al la pafistaj estroj, li ekflustris:

— Perfido, latronaĵo, terura latronaĵo. Kapitan-komodoro Ievlev, tablestro, cara ludsoldato, — estas terure eĉ diri! —

fordonis sin al la svedoj, servas al ili delonge — ne pro timo, sed konscience. Kontraŭ la cara ukazo li faris malbonan aferon: sendis en la maron, renkonten al la sveda floto, sian homon, metian monaĥejan servanton Rjabov-on Ivaĉjon. Tiu Ivaĉjo, malnobla, pro sveda oro kondukis el la maro la floton laŭ la Dvina ŝanelo al la urbo, por grandan ruinigon fari, kaj la ŝipojn bruligi carajn, kaj la ŝipkonstruejojn bruligi, kaj Arĥangelskon, kaj Ĥolmogoron, kaj Vavĉugon, kaj aliajn ceterajn lokojn...

Vilhelmo Noble aŭskultis avide, balancadis la kapon. Remezov rigardis al la vojevodo per rondaj okuloj, miradis.

— Tiu Ivaĉjo dum multaj jaroj ĝis la nuna malfeliĉa tempo estis malaperinta, — estis diranta la vojevodo, — revenis riĉa, de kie? El la sveda tero — jen de kie. Ievlev, judaso, en sian citadelon svedajn senditojn akceptadis kaj tie kun ili kaŝe konversaciis, tie ili ĉe li malaperadis pro nesciata kaŭzo. La plej bonajn fremdlandajn majstrojn, fidelajn carajn servantojn, tiu Ievlev ĉiel senhonorigadis kaj kalumniadis, neniom ilin fidis, arestadis senkulpe, kaj kiam la latronaj ŝipoj atingis la citadelon kaj la batalo okazis, tiu Ievlev preskaŭ la fremdlandanojn pereigis morte, ili apenaŭ ne forbrulis vivaj en la arestejo...

Kolonelo Noble kolere grakis — li ne ŝatis, kiam moskvianoj malbone traktas fremdlandanojn, — firme kunpremis la nodoplenan pugnon. Remezov, male, aŭdinte pri la fremdlandanoj, iom malvarmiĝis.

— Kiuj do fremdlandanoj?

— Sed vi silentu, kolonelo, aŭskultu! — ordonis la princo. — Tiuj fremdlandanoj estas homoj fidelaj. Kiam ili el la aresto saviĝis, tiam ne kaŝi sin iris, sed sur la fortresajn remparojn

leviĝis kaj komencis per kanonoj al la svedo pafi. Kanona majstro tie estis de angla deveno, li mem kanonojn direktadis kaj mem kanonistojn komandis, kaj pro tio nemalgrandan damaĝon la svedoj ricevis. Kaj multaj rusaj kanonistoj, kaj multaj pafistoj, kaj soldatoj, kaj matrosoj, malgraŭ la perfido, sen domaĝi sin, pereis per martira morto. Kaj la Ievlev-aj homoj, judasoj, ne kaŝante sian senhontecon, kun grandaj honoroj akceptis en la citadelo svedan militiston en ruĝa kaftano, trumpetis al li per trumpetoj, batis tamburojn, kiel eĉ al mi, vojevodo, ili neniam faras. Kun tiu homo latrono Ievlev konversaciis dum longa tempo — ĝis lia, de la svedo, morto mem, kaj la okulojn al li fermis, kaj kandelon en la manojn donis...

— Se li kandelon laŭ la ortodoksa moro donis, do, eble, tiu homo estis ne svedo? — ekdubis Remezov.

— Silentu kaj aŭskultu! — kriis la vojevodo. — Fremdlandano, inĝeniero el la Venecia lando, de tiu Ievlev estis torturita morte, forbrulis viva. Fremdlandaj negocistoj, en la Arĥanĝela urbo loĝantaj, laŭ lia latrona ukazo ĉiuj estis arestitaj kaj nur hodiaŭ liberigitaj. Kanonojn sur la negocistaj ŝipoj, komercaj, li, latrono, ordonis preni, pro tio grandan ofendiĝon kontraŭ ni la fremdlandanoj havas, eĉ unu ŝipo ne plu venos komerci...

Vilhelmo Noble kapjesis: certe, ne venos, kial veni?

— Jen, ne venos! — diris la vojevodo. — Sed homaĉoj, kiuj kaŝajn foliojn legis kaj ribeligajn vortojn diris kontraŭ la vojevodo, kaj kontraŭ la bojaro, kaj kontraŭ la laboro en la ŝipkonstruejoj, kaj kontraŭ la negocistoj, — tiuj homoj de Ievlev estis liberigitaj. Por kio tiel? Por tio, ke ili laŭ ekbrulo

intencis al la svedo transiri kaj kune kun la svedo nin trancî, kaj kapojn niajn sur palisojn sidigi, kaj rimenojn el ni eltrancî. Al leŭtenanto, sinjoro Meĥonoŝin, latrono Ievlev mem diris: ni transiru al la svedoj, eliru al ili en la maron renkonten, elveturigu sur kuseno ŝlosilojn de la urbo Arĥanĝela, riverencu per donacoj, estos al ni honoro, estos al ni bono, gajaj ni irados. Ĉu vere mi diras, sinjoro leŭtenanto?

Meĥonoŝin riverencis:

— Tiel, princo-vojevodo!

— Pendos la latronoj en maŝo! — konkludis Prozorovskij, ekstarante. — Al vi, sinjoro kolonelo, kaj al vi, sinjoro subkolonelo, mi ordonas: iri, neniom prokrastante, sur barkoj al la citadelo, meti en ĝi gardojn; latronon Ievlev-on en mia vojevoda nomo kaj laŭ mia ukazo kateni, latronon Ivaĉjon enĉenigi kaj sub gardo liveri en Arĥangelskon, en malliberejon, sub firman gardon. Kun vi iros ĉi leŭtenanto, li estos la komandanto de la fortreso. Jam hodiaŭ aŭ morgaŭ, kiam vi sukcesos kun arestado de la latronoj, skribos mi kurierleteron al lia cara moŝto Petro Aleksejevičĉ, sendos ni la latronojn antaŭ la helajn okulojn de la princo-cezaro, kaj se oni al ni ordonos — ankaŭ ni mem klarigos la aferon, sur fajro la latronoj baldaŭ ekparolos...

La kolonelo rigardis al la vojevodo kun preteco, Remezov sidis, mallevinte la okulojn.

— Kaj ke vi kun la militistaro malfruis — tio ne estos via merito! — severe, minace aldonis Prozorovskij. — Se vi faros en la citadelo bone — ni forgesos kaj Grandan Ustjugon kaj Ustj-Vagon. Se vi same penos, kiel sur la vojo de Vologdo, — mi sendos ankoraŭ kurierleteron. Tro multe nun niaj malamikoj

militistojn subaĉetas, tion en Moskvo oni scias. Iru!

La pafistaj estroj riverencis, foriris sur siajn barkojn.

La vojevodo ree eksidis sur la benkon, dismetinte la krurojn, retrokliniĝinte, — korpulenta, morna. Liaj okuloj kuris, li ree komencis timi la entreprenitan aferon.

— Aŭ li vin, princo, aŭ vi lin! — ekparolis Meĥonoŝin. — La spinon rompi necesas tuj, senprokraste! Se ni perdos tempon — li formanĝos nin kun tripo. Nun mi adoris vin, kiom kuraĝe vi kun ili konversaciis. Ili ektimis kaj obeos vin en ĉio...

La princo interrompis:

— La popolaĉo, la popolaĉo malnobla, jen kiun mi timas. Ili babilos ĉion, ĉiuj scias, kiu homo la svedan ŝipon surgrundigis.

Meĥonoŝin diris kun malestimo:

— Ĉu popolaĉo? La popolaĉo, princo-vojevodo, sub bastonoj forgesos patron kaj patrinon, ne nur la rudriston. Ni bruligos faskojn, levos sur pendigilon, glatumos per fajro, kuros tra la urbo Dia timo — ili tuj eksilentos. Kaj se ni timos — ni pereos. Se ni timos, princo, kaj veturos la petksribo pri vi al Moskvo, tiam oni trenos en la Preobraĵenskan kancelarion, al la princo-cezaro mem...

Prozorovskij malkviete moviĝis sur la benko, svingis la manojn:

— Pu, pu, rigidiĝu via lango.

— Preni la latronojn necesas, — diris Meĥonoŝin, — ĉiujn ĝis la lasta. Sur la Marka insulo estas latronoj kunpelitaj, fuĝintaj servutuloj, ŝiritaj nazotruoj, hakitaj fingroj. Mi ilin per razio kaptis en arbaroj, sed latrono Krikov persvadis Silvestron

meti tiujn kanajlojn sur la insulon. Ĉiujn necesas sub gardon en arestejon, de ili, probable, ankaŭ la petskribo estas pri vi, pri nia vojevodo...

Li surtiris la ganton, admiris sian manon, reĝustigis sur la kokso la spadon. Prozorovskij estis snufanta, palpebrumanta, nenion kuraĝante respondi.

— Mi tuj finus tiujn latronojn sur la Marka! — proponis Meĥonoŝin.

— Ĉu ili estas multaj? — demandis la vojevodo.

— Nemalmulte.

— Vi unue Ievlev-on prenu, poste — la fuĝintojn. Mi timas bruon, leŭtenanto... Ĉu la rudristo ne troviĝis, Rjabov?

— Mi ne aŭdis...

— Nu, iru, iru, faru...

Meĥonoŝin foriris.

Prozorovskij, sulkinte la frunton, pensadis siajn maltrankvilajn pensojn. Mallaŭte paŝante sur la piedpintoj, nerimarkeble aperis kancelariano Gusev, diris, ke kanona majstro angla fremdlandano Reger Ripley postulas monon pro la cara servo, kiel estis interkonsentite. La princo ordonis pagi.

— Ĉu plene? — demandis la kancelariano.

— Plene! Sed ĉu ili ĉion skribis, kio necesas?

— Ĉion, princo...

Post la kancelariano venis princino Eŭdokia, larmokovrita, timigita, komencis demandi, ĉu oni veron diras, ke kvazaŭ la princo ordonis Ievlev-on aresti. La vojevodo montris la

dentojn, elmetis la okulojn, kriegis, ke tio ŝin ne koncernas, svingis al la korpulenta princino bastonon. Al la krio de la patro alkuris la maljunaj fraŭlinoj kun la princido — kvietigi la vojevodon. Pro furiozo lia nazo purpuriĝis, la grasaj vangoj skuiĝis, li mem estis komprenanta, ke faras malbone, sed returna vojo jam ne estis. Li kriegis al ĉiuj longe, poste kuŝiĝis ripozi, sed tuj kiam li ekdormetis, li sonĝis tielaĵon, ke prefere li ne kuŝiĝus. La princino preĝis super li por forigi envulton, diris tra larmoj:

— Eble, al la urbo vi veturu, princo? Atendas oni, verŝajne, vin, vojevodon, tie estas festo, sonoriloj sonoras...

— Ĉu Meĥonoŝin estas ĉi tie?

— Ankoraŭ ne.

— Ĉu la dumaano revenis?

— En la urbo li estas, princo...

La vojevodo ree senkuraĝiĝis — sen siaj helpantoj li timis ĉion. Kaj ankoraŭ misfortune rekomenciĝis lumbodoloro, la malnova malsano. La princo oĥadis kaj ĝemadis ĝis kiam la kancelarianoj alportis kurierleteron de la dumaano. Tiu skribis, ke Arĥangelsko estas preta renkonti la vojevodon, la ordo estas instalita, gardantoj estas ĉie starigitaj, baldaŭ oni malŝlosos ankaŭ la arestejon, kiun latrono Ievlev ŝlosis per seruro. Dume oni neniel povas trovi ekzekutiston Pozdjunin-on, pro timo li malaperis nesciate kie senspure...

— Jen, kia malkuraĝulo! — plendis la vojevodo. — Necesas puni...

Li trinkis vodkon, krakmaĉis peklitan kukumon. Bona animstato estis revenanta al la vojevodo. Li sidis, larĝe

dismetinte la krurojn, parolis kun suspiroj:

— Sen malliberejo, sen arestejo, sen fortika prizono la urbo ne tenos sin. Tion ĉiu scias: kia vojevodeco povas esti sen ekzekutisto...

La kancelarianoj konsentis:

— Vere!

— De antikvaj tempoj tiel estas...

— Alie ne eblas...

En la korto kun abruptaj ekkrioj oni estis preparantaj trajnon por la vojevodo — reveni en la urbon por regi, juĝi, instali veran ordon. Oni estis jungantaj kaleŝon, kaleŝetojn por la parazitoj, ĉarojn por la servistoj...

En la pordon enŝoviĝis kancelariano Molokojedov, diris kun malĝojo:

— Mastro eminenco Atanazio estas tute malbona, princo-vojevodo. Oni diras, ke oni preparis lin por konfespreno kaj eŭĥaristio, sed li ne permesis, — tro frue, diris. Eble, vi vizitu lin?

— Mankas tempo, mankas! — forsvingis la vojevodo. — Kaj por nenio! Ne tro ni amikis...

Molokojedov konfuziĝis, ankoraŭ tusis:

— Sed tamen...

— Iru! — kriis la princo. — Sen li mi sukcesos! Mankas tempo — kaj fino!

Sed li tuj ektimis, ŝanĝis la decidon, ordonis doni al si peltmantelon kaj altan ĉapon, apogilon kaj kaleŝon. Distanco

ĝis la bieno de Atanazio estis ne pli ol cent klaftoj, sed al la vojevodo ne decis iri perpiede, kaj li traveturis tiun distancon en la kaleŝo. Laŭ la ŝtupoj lin kondukis ĉe la brakoj Gusev kaj Abrosimov.

La servisto, ekvidinte la vojevodon, ĵetiĝis per ĉiuj fortoj en la dormoĉambron al Atanazio. Tiu responde subite malforte subridis, diris kun ĉagreno:

— Jen! Li venis instrui min morti. La scienco ne estas komplika, mi mem mortos. Ĉiuj instruas — instruistoj! Pelu lin for...

5. La vojevodo ree en Arĥangelsko

Antaŭ vespero la trajno de la vojevodo enveturis en Arĥangelskon.

Ekvidinte la kaleŝon de la princo kaj lian surĉevalan gardistaron, ekvidinte postiljonojn, hajdukojn, kondukistojn, karakolantajn rajdistojn, metiistoj subridadis, interparoladis, knaboj, ne timante skurĝojn, fajfadis per fingroj, ululadis. La princino, sidante apud la vojevodo, tute subfalis pro timo, la maljunaj fraŭlinoj princidinoj, afektante en la eksterlanda maniero, prononcadis nekompreneblajn vortojn:

— Aĥ, aĥ, kiaj krudaj muĵikoj, kiel ili renkontas sian dignitarion...

— Aĥ, aĥ, nenia komplimenteco!

— *Mein lieber Vater*, ne atendu de ĉi kampuloj Temison...

La princo silentis, snufadis, rigardis al la soldatoj kaj laboruloj, kiuj estis forigantaj baraĵojn kaj barierojn de la bordoj de Dvino, al kanonistoj, kiuj estis trote forveturigantaj

de la batallokoj kanonojn, mallongajn mortirojn, kolubropafilojn, surmetadis sur ĉarojn korbojn kun kuglegoj, kun sonoro ĵetadis stangojn, skovelojn, ŝargenigilojn, ŝtopileltirilojn...

La urbo ne plu estis prepariĝanta por batalo kontraŭ malamiko, la urbo ĉesis esti fortreso. Ĉe plene malfermitaj barieroj gardantoj estis manĝantaj sian kaĉon, gvatantoj sur ĉevaloj ne plu staris ĉe la enveturejo. Gaje intersonoradis restintaj sur sonorilejoj kaj sur preĝejaj kampaniloj malgrandaj sonoriloj; sur la stratojn, sur la bazaran placon, sur la bordojn de Dvino estis elirantaj majstroj, metiistoj, ŝipistoj, fiŝistoj, portistoj, akaparistoj. Popolo ridis, jen tie, jen ĉi tie homoj komencadis kanton, virinoj ĉe anguloj komercis per bakita fiŝo, laŭtvoĉe laŭdante sian varon, bulkistinoj vendadis buterbulkojn. Matrosoj ne vice, sed dise promenadis sur stratoj en siaj cejanbluaj senmanikaj jakoj, en ĉapoj, metitaj sur unu orelon, — tio estis matrosoj, jam paŝintaj sur ferdekojn de kaptitaj ŝipoj. Histriono kun urso gajigadis homamason apud la Komerca korto, iradis, frapante per la kalkanumoj, sur tabula planko, kie ĵus staris longtuba kanono.

Subite la kaleŝo haltis.

La hajdukoj kun skurĝoj komencis premi la popolon, sed la homamaso kuniĝis tiel dense kaj per tia insultado renkontis la vojevodajn servantojn, ke tiuj tuj senkuraĝiĝis kaj movis sin malantaŭen.

— Kio estas tie? — demandis la princo.

— Histriono kun urso, — respondis princino Eŭdokia. — Aĥ, aĥ, kiom amuza...

— Deŝoviĝu, bovinaĉo! — ordonis la vojevodo.

La princino subite preskaŭ svenis, eksvingis la manojn, la princidinoj komencis el flakoneto flari fremdlandan flarsalon, la princido ekridis, larĝe malferminte la buŝon. La princo-vojevodo komence ne komprenis, poste ruĝegiĝis pro terura ofendo: sur la urso estis alta bojara ĉapo, farita el ŝelo, — saman, nur el pelto, nur la vojevodo rajtis porti en la tuta Ĉedvina regiono. Kaj la histriono tiutempe estis amuzanta malnoblajn homojn, kvazaŭ ne rimarkante la trajnon de la princo, kiu haltis ĝuste antaŭ la podio mem, kie nun estis tintiganta siajn sonoriletojn la dresita urso.

— Liberigu la vojon! — raŭkis la princo al hajduko.

La hajduko svingis la skurĝon, sed tuj apud li fajfis ŝtono, la popolo ekululis, ankoraŭ unu ŝtono batis la kaleŝon. Kaj la histriono estis krianta:

— Nu, Miĥaelo Ursido, montru, kiel la vojevodo de la svedo fuĝas...

La urso, tenante sian ventron, roris, kankroiris, skuis la kapon, montris, ke li timas, kaptante per la manego sian mastron, trenis post si — fuĝi...

— Kaj nun, Miĉjo, montru ĉi vojevodon, kiel li subaĉetaĵojn prenas! — per raŭketa voĉo kriis la histriono. — Montru, Miĉjo...

La urso, rorante, ekiris antaŭen...

La princo tute freneziĝis, kriegis en la fenestron de la kaleŝo:

— Per skurĝoj lin! Sub areston, tuj...

Kaj li furioziĝis eĉ pli: la sekvantaranoj same ridis, ridaĉis, de malproksime rigardante al la histriono kaj lia urso en alta ĉapo, sed ekvidinte la torditan, purpuran pro furiozo vizaĝon de la princo, la hajdukoj tuj ĉesis ridi, galopigis la ĉevalojn, ekfajfis, batis la homamason per skurĝoj. La popolo kun krio, kaŝante la kapojn de la batoj, retiriĝis, la ĉevaloj tretis la homojn, baŭmis, ĵetante ŝaŭmon. La podio kun la histriono malfermiĝis — la urso estis pace staranta antaŭ la princa sekvantaro, flaris la aeron, liplekis. La histriono glatumis lin, dirante per blankaj lipoj:

— Ne timu, Miĥaelo... Ne timu...

Kaj en tio, kiajn rigardojn ĵetadis la histriono al la armitaj rajdistoj, estis io tiom fiera kaj sentima, kolera kaj moka, ke la princo forturniĝis kaj ne plu rigardis tien. Kaj, elgrimpante el la kaleŝo en sia korto, diris al renkontanta dumaano Larionov:

— Bonan ordon vi instalis, hundinido! Bone vi akceptis vian vojevodon... Nu, atendu, ni ankoraŭ parolos...

Kaj ordonis:

— La histrionon bati per bastonoj senkompate, ĝismorte, jam hodiaŭ! La urson levi sur pikstangon! Al la hajdukoj kaj ĉiuj ceteraj, kiuj ridaĉis, vidante malhonoradon al sia bojaro, — po kvindek knutaj batoj al ĉiu...

Larionov riverencis, la kancelarianoj kun timo interrigardis.

Poste venis Larionov, diris per sia firma voĉo, ke la histriono mortis, kaj la ursan felon li, la dumaano, ordonis prilabori por la vojevodaj ĉambroj.

Dum la tuta nokto la vojevodo ne povis ekdormi — atendis novaĵojn el la fortreso. En longa ĝis la genuoj, kolora silka

ĉemizo, anhelante pro sufoka aero, ferminte ĉiujn ŝutrojn, viŝante ŝviton per viŝtuko, li iradis sur knarantaj plankaj tabuloj, piedbatadis per siaj marokenaj tataraj pantofloj dormemajn ronronantajn katojn, vokadis gardistojn, demandadis per humida pro timo voĉo, ĉu estas kviete en la urbo. La gardistoj ne sciis, la vojevodo minacadis:

— Gardu diligente, mi vin senfeligos!

Antaŭ la mateno, ne senvestiĝinte, li ekdormetis sur benko, kaj ree, kiel antaŭe en Ĥolmogoro, li sonĝis malbonon: nigran akvon, kaj oni ĵetas lin tien, en la akvon, li deziras fuĝi, sed la piedoj ne iras...

La vojevodon vekis kancelariano Abrosimov, raportis, ke fremdlandanoj atendas vojevodan favoron — adiaŭi, iliaj ŝipoj foriras hodiaŭ en la maron. Kancelariano Gusev tenis sur pleto ŝipajn paspermesilojn, ĉiuj estis skribitaj sur multekosta Aleksandria papero, kaj ĉiu havis kopion en Latino. La vojevodo, ŝvita pro la malbona sonĝo, hirta, akceptis la ŝipestrojn afable, al ĉiu ŝipestro li donis la paspermesilon, diris, ke nun al la ekscesoj de la kapitan-komodoro estas metita fino. Konsulo Martus riverencis, respondis, ke li estas feliĉa aŭdi la bonan informon. Prozorovskij invitis la ŝipestrojn nepre esti ĉe foiro en la sekvanta jaro. Servisto alportis vinon malvazion. Kanonmajstro Ripley tostis vivuon al vojevodo princo Prozorovskij — klera kaj grandanima grandsinjoro. La fremdlandanoj kriis «vivu!». Konsulo Martus tostis alian vivuon — al princo Prozorovskij, la venkinto de la svedoj. La gastoj ree kriis «vivu!» La princo, gajiĝinte, ordonis al la gastoj sidiĝi al la tablo. Kanonmajstro Ripley sidis maldekstre de la vojevodo, parolis kun simpatio:

— Ni ĉiuj, kleraj eŭropanoj, komprenas, kiel al via moŝto estas malfacile havi aferon kun barbaroj, similaj al Ievlev. Sed niaj leteroj, en kiuj estas detale priskribitaj suferoj, trafintaj nin en Moskvio, sendube atingos la manojn de la granda Siro. La glora Siro ploros pri nia sorto kaj severe punos la kulpulojn...

Post horo la vojevodo de sur la perono de sia domo vidis, kiel sur la negocaj ŝipoj la ŝipanoj komencis levi la velojn, prepariĝante al eliro en la maron.

Reveninte en la ĉambron, Prozorovskij vokis la kancelarianojn, ordonis al ili laŭtlegi ĉion, kion skribis la fremdlandanoj. La kancelarianoj legadis, tradukadis, interpretadis la skribitan. La vojevodo aŭskultis kaj kapjesadis — bone skribis la fremdlandanoj, kiel necesas skribis, nun al la spitema Ievlev estos fino...

Sed en la koro plu sidis maltrankvilo: el la fortreso Meĥonoŝin ankoraŭ ne revenis.

Ĉapitro dua

> Ĉiujn oficirojn sen juĝo ne aresti, krom perfidaj aferoj.
>
> *Petro I*

> Kaj vi pulvon ne malŝparu, kaj pafaĵojn vi ne rompu:
> Min neniam kuglo tuŝos, nek kuglego trafos min.
>
> *Kanto*

1. Vian spadon, kapitan-komodoro!

Sur la fortresa tombejo oni pafis per muskedoj, fusiloj kaj arkebuzoj — tri salvojn en la aeron super la tombo. Semisadov kaj Ĥagajo Pustovojtov estis korektantaj la krucojn sur la tomboj de Demĉjo kaj Jakobo. La homoj jam foriris, de la maro blovis malvarmeta vento, super la freŝaj tombomontetoj de laboristoj, kanonistoj, soldatoj kaj pafistoj ankoraŭ preĝis, mallaŭte plorante, edzinoj, patrinoj, fratinoj. Ĉe unu tombomonteto staris sur la genuoj matroso, tenis sur la manoj suĉinfanon — la filon, per la polmo zorge transŝutadis al la monteto nigran Dvinan teron. Super tiu tombeto de la matrosa edzino Justina oni same pafis per fusiloj kaj muskedoj...

Subite el la fortresa pordeto, larĝe paŝante, aperis Rezen, aliris al Ievlev, diris haste en la germana:

— Kara amiko, ĉi tie estas dragono Meĥonoŝin kaj kun li du pafistaj estroj — ambaŭ treege gravmienaj kaj nealireblaj. Sur barkoj estas multegaj pafistoj — el Vologdo. Ili okupas gardpostenojn, komandas ĉion kaj postulas vin. Ili ankaŭ serĉas la piloton...

Silvestro Petroviĉ elprenis la pipon el la buŝo, deziris ion demandi, sed ne sukcesis. La fera pordeto kun grinco malfermiĝis, en la tombejon eniris la leŭtenanto, post li — maldika kiel stango, hoknaza, kun hirtaj lipharoj kolonelo Noble, kiel tria — subkolonelo Remezov, nealta, korpulenta. Malantaŭe iris soldatoj kun nudaj sabroj, fremdaj, ne lokaj.

Ievlev, apogante sin sur lambastono, leviĝis, ŝovis la pipon en la poŝon, atendis. Meĥonoŝin aliris tute proksime. Silvestro Petroviĉ ekrigardis en liajn okulojn, ĵetantajn rigardojn ĉiudirekten. Ĥagajo Pustovojtov kaj Semisadov, ne fininte sian laboron, same aliris.

— Ĉu vi estas eksa kapitan-komodoro Ievlev? — demandis Meĥonoŝin per obtuza voĉo.

— Kaj ĉi vi ne konas min?

La leŭtenanto por momento konfuziĝis.

— Mi estas kapitan-komodoro Ievlev, kaj ne eksa, sed nuna kaj estonta, kaj ne vi, fuĝinta de via militista devo, ne vi, forgesinta la militistan ĵuron, kun mi parolu! — paliĝante pro kolero, diris Silvestro Petroviĉ.

Meĥonoŝin, turniĝinte al la pafistoj, kriis:

— Kvindekestro, forprenu de ĉi latrono la spadon!

Fortika pafisto aliris al Ievlev, per peza mano prenis la portepeon. Ievlev ŝiris sin, la lambastono elglitis el sub lia kubuto. Perdinte ekvilibron, Ievlev paŝis per la malsana kruro kaj, raŭkinte pro doloro, falis. Ĥagajo kaj Semisadov ĵetiĝis al li, kaptis sur la brakojn. Rezen forpuŝis Meĥonoŝin-on flanken, nudigis la spadon. De la tombomontetoj, ne komprenante, kio okazis, kuris virinoj, soldatoj, matrosoj...

— Nu! — kriis Rezen al Meĥonoŝin. — Elprenu vian spadon, diablo prenu!

Meĥonoŝin retropaŝis, antaŭen eliris kolonelo Noble.

— Ne necesas troa sango! — diris li kun fremda akĉento. — Nun ne eblas helpi. Nun necesas plenumi ordonon.

Li nerimarkeble palpebrumis al siaj pafistoj, ili iris post la dorson de Rezen, surfalis lin de malantaŭe, elbatis la spadon el liaj manoj. Semisadov, depuŝiĝinte per la lignaĵo, impetis al la pafistoj, post li ĵetiĝis en batalon Ĥagajo, sed ilin ambaŭ oni tuj kaptis. Meĥonoŝin, starante malproksime, ree ordonis:

— Kvindekestro, deprenu de ĉi latrono la spadon. Ĉu vi min ne aŭdis?

Ievlev, sidante sur ies tombo, estis mallaŭte ĝemanta, ŝvito ruliĝis sur lia terure paliĝinta vizaĝo. Subkolonelo Remezov diris al li mallaŭte:

— Sinjoro kapitan-komodoro, enmanigu al mi vian spadon.

Ievlev levis la elturmentitajn okulojn al Remezov, subite ekfidis lin, per tremantaj fingroj malfermis bukon sur la portepeo, kisis la tenilon de la spado, etendis ĝin al la subkolonelo. Tiu same gardeme akceptis ĝin, parolante plu nelaŭte, amike:

— Mi petas — obeu nun al ĉio. De la vojevodo estis levita denunco, la tempo juĝos, homoj helpos. El rezisto tamen nun ne povas rezulti io bona...

Kaj, flankeniginte per la mano la pafistojn, alirintajn al Ievlev, por kateni lin per ĉenoj, Remezov potence ordonis:

— La kapitan-komodoro estas malsana, kaj ĉenojn sur lin

meti ne eblas! Donu brankardon!

Oni alportis brankardon. Jegoro Rezen, elŝirante sin el la manoj de la pafistoj, sakradis en la rusa kaj en la germana.

Ĉirkaŭe sur la tombejo bruis homamaso, el la pordeto estis irantaj Vologdaj pafistoj, la fortresa popolo, nenion komprenantaj kanonistoj, matrosoj, soldatoj. Iu lanĉis vorton «perfido», ĝi estis transdonata el buŝo al buŝo. Meĥonoŝin, priserĉante fortresajn tenejojn, eniris en la domon de Rezen, demandis, kie estas la rudristo; ĉie li diradis, ke Ievlev transiris al la svedoj kaj nun lin atendas malhonora ekzekuto. Homoj ne kredis, interrigardadis. Unu fiŝisto diris, ke perfido ne povis esti, lin Meĥonoŝin tuj batis per vipo al la vizaĝo tiel, ke tuj ŝprucis sango. Rudriston Rjabov-on oni ne trovis, ĉiuj unuvoĉe diris, ke li dronis. Tra la fortresa placo, kie bruis la popolo, kvar pafistoj silente portis la brankardon. Ievlev kuŝis, ferminte la okulojn. Semisadov, frapante per la lignaĵo, paŝis apude, glutante larmojn, submetadis sub la vunditan kruron de Silvestro Petroviĉ fojnon, por ke estu pli mole. Apud la velboato Ievlev diris al la ferdekestro:

— Nu, Semisadov, ĉu vi ne pensis, ke vi min post ĉi batalo tiel akompanos?

La ferdekestro nur grincis per la dentoj.

Meĥonoŝin kaj kolonelo Noble restis en la citadelo — instali ordon. Sur la velboato Remezov eksidis ĉe la brankardo, kovris Ievlev-on per mantelo. Matroso demandis:

— Sinjoro kapitan-komodoro, ĉu la vimplon hisi?

— Kian vimplon? — interesiĝis Remezov.

— Vimplon ni laŭ la mara regularo levas, signifantan: «La

supera mara estro estas ĉi tie»...

Remezov demandis kolere:

— Kaj kie do estas la supera mara estro?

— Do... jen li... — perplekse respondis la matroso. — Sur la velboato estas sinjoro kapitan-komodoro...

— Do, levu, se li estas sur la velboato! — diris Remezov. — Levu!

La matroso lerte survolvis sur la manon la hisilon, tiris. La vimplo leviĝis sur la maston, gaje malvolviĝis, ekflirtis sub Dvina vento. Silvestro Petroviĉ kuŝis silente, rigardis en la palan, apenaŭ bluetan ĉielon. Tie oblikve, kun krioj ŝvebis mevoj, supre malrapide naĝis lanugaj nuboj.

— Ĉu vi havas edzinon, sinjoro kapitan-komodoro? — demandis Remezov.

— Havas.

— Kaj infanojn havas?

— Du filinojn.

Remezov suspiris, balancis la kapon.

— Kial vi suspiras?

— Tial mi suspiras, ke mi timas — estos longa afero. Ĉu Petro Aleksejeviĉ konas vin?

— Konas iomete, — ne tuj respondis Ievlev.

— Ĉu favoras?

— Favoras caro, sed malfavoras servistaro. Ĉu vi aŭdis tian diron? Kaj ankoraŭ oni diras en Rusujo — caraj favoroj tra bojara kribrilo iras...

Li silentis iom, neatendite subridis, prononcis nekompreneblajn por Remezov vortojn:

— Bedaŭras mi, ke mortis sinjoro Krikov, pereis en honesta batalo. Ridus li nun ĝissate, rigardante min. Krevus, mi pensas, pro rido. Ĉio laŭ li okazis!

2. Ĝisatendis favoron!

Pri tio, ke Ievlev estis arestita, sur la Marka insulo oni eksciis preskaŭ tuj. Eksciis oni ankaŭ tion, ke leŭtenanto Meĥonoŝin iĝis estro kaj serĉis en la fortreso rudriston Rjabov-on, kiun li same intencis preni en malliberejon.

Silentulo, eksciinte pri ĉiuj ĉi eventoj, kolere grakis, pli dense envolvis sin en truitan peltmanteleton, diris al la viroj:

— Nun vi ĝisatendis! Diris mi al vi, stultuloj, foriri necesas! Ne, ni favoron ĝisatendos. Nun vi certe ĝisatendos! Hodiaŭ aŭ morgaŭ oni nin ĉiujn prenos, ĉiujn en malliberejon pelos, ĉion pri ni rememoros...

La viroj ne respondis. En silento aŭdeblis, kiel en la fortreso tamburoj batas vespersignalon, kiel ludas tie klarionoj: la nova komandanto faris ekzercadon.

Silentulo febrotremis, li deziris preni ŝvitbanon, trinki lakton, dormi en domo. Sur la insulo ĉiam estis humide. Pro malvarmaj kaj humidaj Dvinaj nebuloj, pro konstantaj en tiu ĉi somero pluvoj, pro la arbara lupa vivo doloris la ostoj. Envolvinte sin en sian ŝiritan kaj trabruligitan peltmantelon, li senmove trasidis ĝis krepusko, poste sidiĝis en boateton, veturis en nemalproksiman vilaĝeton — eble, tie, kie oni hejtas banejon, oni enlasos la senhejman homon.

La vilaĝeto estis malriĉa, griza. Silentulo rigardis al fumoj, rememoris, ke hodiaŭ estas sabato[117]. Malgaja dvinano, tuta en faltoj, grizbarba, neparolema, sen eĉ unu vorto enlasis la fremdulon al si por ŝvitbani. La banejo estis varmega, da akvo estis multe. Lavinte sin, Silentulo eniris en la domon — trinki lakton. Blondaj nepoj de la neparolema mastro ĉirkaŭis la gaston. Li karesis iliajn kapojn, kun doloro rememoris siajn pli junajn gefratojn, forlasitajn de li al la volo de la sorto. La infanoj pepadis, li respondadis al ili, ridetante per sincera, bonkora rideto. La avo sidis sur benko malproksime, per ŝufadeno kudris truiĝintan boton. El la korto, de najbarino venis la maljuna avino, riverencis al la gasto, rakontis, ke la batito nun fartas pli bone, li trinkis kvason kaj manĝis kaĉeton. Silentulo streĉiĝis, poste demandis, kia batito?

— Ja ĉu negocisto, kiu lin scias! Kaftano sur li estas tro riĉa! — diris la maljunulino. — Kiel tiam la batalo fariĝis, lin tie oni vundis, Dvinan akvon li ĝissate glutis, al nia najbaro alrampis. Ni pensis, ke li mortis, sed li — jen kia estas viro — reviviĝis, foriri deziras...

La okuloj de Silentulo ekbrilis, li leviĝis, ekhastis serĉi la malsanulon. La maljunulino ordonis al la infanoj akompani la gaston, ili ekkuris antaŭ li per gaja kompanio. Kun batanta koro eniris Silentulo en malaltan fulgokovritan domon. En ŝranketo super kuvo estis brulanta kena torĉo, ĝia timida flamo prilumis la vizaĝon de Rjabov, kuŝanta sur benko. Liaj piedoj estis kovritaj per malnova ŝaffelo, sub la kapo estis granda kuseno, la okuloj rigardis kun bonkora moko.

---

117 Sabato tradicie en Rusio estis tago por bano. Multaj fumoj montris, ke multaj banejoj estis hejtataj *(trad.)*.

— Eble, vi jam entombigis min? — demandis li. — Sed mi ree estas viva! Rakontu, ĉu jam entombigis aŭ ankoraŭ atendas? Ĝuste nun mi kuŝas kaj kalkulas, kiam ĉio tio estis? Ĉu hieraŭ aŭ pli frue?

Silentulo eksidis sur la benkon, intencis respondi, sed ne sukcesis — ekploris. Rjabov plu rigardis al li per senmova rigardo, poste ree demandis:

— Ĉu Metrio viva revenis?

— Mortis Metrio, — mallaŭte respondis Silentulo.

— Mortis... — ripetis la rudristo.

— Ĉe ni sur la Marka insulo li mortis! — diris Silentulo. — Li tuta batita estis. Sed vi kiel ĉi tien trafis?

Rjabov longe ne respondadis, poste ekparolis per malforta voĉo:

— Nun mi eĉ ne povas rememori! Frostiĝis mi en la akvo, vundita. Sur la bordon mi eliĝis jam preskaŭ sen konscio. Salikoj tie estis, ia densaĵo kiel marĉeto. Do mi ekrampis. Hundoj, mi aŭdis, bojis, je fumo odoris, mi ĉiam rampis...

Li fermis la okulojn, laciĝis. La infanoj, venintaj kun Silentulo, interrigardadis, puŝadis unu la alian. Unu knabo — pli aĝa, ĉirkaŭ dek jarojn — diris:

— Emilĉjo la bovinon tiam pelis, Emilĉjo mem vidis...

Emilĉjo, kaŝiĝinte post aliaj geknaboj, diris el tie base:

— Mi vidis — li kuŝas en sangego, kaj ĉio.

— Kaj kie li kuŝis?

— Kie? Apud la palisaro li kuŝis...

— Nun jam nemalbone! — diris la mastrino, blankvizaĝa pomorino. — Nun ĉio estas — dankon al Dio, sed komence ni pensis — mortinto. Eĉ ne spiris...

Ŝi ŝanĝis la kentorĉon, demandis Silentulon kaŝe:

— Kia homo li estas? La kaftano ja estas tre riĉa, brokaĵa, tian eĉ la vojevodo en labortago ne surmetas...

Rjabov aŭdis; ne malfermante la okulojn, diris:

— Kio por mi estas vojevodo, kiam mi mem estas fiŝisto!

La mastrino vokis Silentulon per la fingro, flustris en lian orelon:

— Kaj kio estas tiu gasto, mi ne scias, kion pensi. Mia edzo tiam komencis malvesti lin, vidas — monujo. Da moneroj oraj estis nekalkuleble...

...Jam antaŭ longe revenis la mastro, antaŭ longe foriris la najbaraj infanoj, antaŭ longe la juna mastrino kuŝiĝis dormi sur la fornon — Silentulo plu sidis ĉe Rjabov, ne decidiĝante diri al li pri la sorto de Silvestro Petroviĉ. Ili parolis pri alio — pri la batalo, pri tio, kiel pereis Krikov, kiel la svedoj elŝipiĝis sur la Marka insulo, kiel komencis kapitulaci svedaj ŝipoj, kiel eksplodis «Krono». Finfine, jam longe post la noktomezo, Silentulo decidiĝis — rakontis ĉion.

— Jen kiel! — ne mirinte, penseme prononcis Rjabov. — Kontraŭ la kapitan-komodoro mem ili la manon levis. Kuraĝa estas la vojevodo, kuraĝa, nenion eblas diri... Kaj vere, Paŭlo Stefanoviĉ, estas lia potenco...

— Vere, ke lia, dum ni estas ŝafoj. Kaj vin, fiŝisto, oni kaptos kaj en malliberejon sidigos, se vi kun ni ne foriros...

— Vere...

— Kaj se oni vin arestos — viva vi ne revenos, ne...

— Pro kio do oni arestos?

— Ŝajne pro perfido...

Rjabov subridis, lia vizaĝo iĝis malbonkora.

— Pro perfido? Kaj la kapitan-komodoron pro perfido?

— Certe! Atendu, rudristo, aŭskultu, kion mi diros: ni ĉiuj foriri devas. Ni foriros en la tajgon, mi tieajn vojojn konas. Samojedojn ni trovos bonajn, ne pereos. Kaj post paso de tempo ni iros al Volgo, en stepojn. Ne la ĉi-tiean vojevodon, alian, sed senhaŭtigos. Vi estas tute malforta, eĉ guto da sango en la vizaĝo ne estas, por kio vi en la malliberejon iru, mortigos oni vin tie, mi scias. Por vi alia, ol kun ni, vojo ne estas. Mi la miajn jam hodiaŭ forkondukos. Obstinas la viroj, favoron atendas, sed ne ĝisatendos. Ni foriros trans la barilon, al via edzino sendos sciigon, ke vi vivas, kaj dume prepariĝu. Ĉevalojn ni aĉetos, forrajdos...

La rudristo, ne respondante, ree fermis la okulojn. Silentulo leviĝis, ekiris al la Dvina bordo, al sia boateto. La nokto estis varma, nebula, malhela. Sur la insulo neniu dormis, sed lignofajron oni ne bruligis, sidis en kavo, dense alpremiĝinte unu al la alia, aŭskultis Teodozon Forĝiston, kiu ĵus venis el la urbo.

— Pri kio estas parolo? — demandis Silentulo.

— Preni nin oni hodiaŭ intencas! — per kolera, laca voĉo respondis Teodozo. — Mi ĝuste scias. De fidela homo, de soldato, kiu staris kiel gvatanto sur la Kanona korto.

Rememoris sinjoro Meĥonoŝin, kiel kaptadis vin en arbaroj...

— Ni ne lasos nin preni! — dentomontris Silentulo. — Muskedojn ni havas, fusilojn, pulvon. Kiel ŝafoj ni ne iros...

La viroj ekparolis tuj, ekdisputis, iuj deziris foriri jam nun, aliaj estis por akcepti la batalon kaj kvitiĝi pro siaj ofendoj. Teodozo Forĝisto diris, ke la monstrojn necesas instrui, por ke ili ne plu kaptu proprajn homojn.

Ĝis la matenruĝo en la kavon ili kuntrenis la tutan armilaron, kaptitan de la svedoj. Forĝisto, grumble insultante, pririgardis la fusilojn, muskedojn, montris al nesciantoj, kiel necesas ŝargi, kiel celi, kiel pafi. Matene gvatanto ekvidis sur Dvino du barkojn kun soldatoj. La militistoj estis multaj, sub la suno briletis tubo de kanono. La barkoj estis irantaj al la Marka insulo.

— Jen ĝi, favoro! — diris Silentulo. — Ĝisatendis!

Kaj ordonis de la insulo foriri sen batalo.

La viroj obeis, komencis transpasi la riveron al la vilaĝeto. La barkoj iris malrapide, ilin deŝovadis la fluo, la soldatoj remis mallerte, ne en la loka maniero. La lasta sur la insulo restis Teodozo Forĝisto. Li amare ĉirkaŭrigardis la murojn de la Novdvina citadelo, de kiuj pafadis liaj kanonoj, rigardis al la pobo de la sveda flagŝipo, kiu plu staris super la akvo, rigardis tien, kie li instalis la vinĉon kaj la ĉenon por gardo kontraŭ la svedo, kaj, tenante en la manoj muskedon, komencis ree fiksrigardi la antaŭan barkon. Liaj okuloj mallarĝiĝis, li longe serĉis per rigardo kaj finfine ekvidis dumaanon Larionov-on, kiu, metinte la piedon en danda boto sur la malaltan randon de la barko, estis ion diranta al alta kaj maldika kolonelo-

fremdulo.

— Vidu, li montras! — flustre diris Forĝisto al la grandorela hundido, restinta kun li sur la insulo. — Vidu, kion li faras. Ne fremdlandano, propra, rusa dumaano...

Nehaste li kunpremis la muskedon per la polmoj kaj komencis malrapide levi la tubon de la brilanta, kuranta akvo ĉiam pli alten, al la barko kaj ankoraŭ pli alten — laŭ la kaftano de dumaano Larionov. La dumaano estis vestita hodiaŭ same, kiel en tiu nokto, kiam li komandis la torturiston kaj la senterulojn en la arestejo, — en la sama griza kamizolo kaj malbutonita ruĝflava fremdlanda kaftano. Sur la kamizolo estis surkudritaj butonetoj — arĝentaj kaj oraj intermite. Ĝuste laŭ tiuj butonetoj movis Forĝisto la muskedon ĝis la momento de pafo. La grandorela hundido pro neatenditeco bojis, la dumaano svingis la manojn kaj falis dorsen en la barkon — malviva. Tie oni ekrapidis, la barko kliniĝis, la soldatoj komencis krii, ŝargante siajn blunderbuzojn. Sed Teodozo ne atendis kaj per rapidaj paŝoj ekiris al la transpasejo. Post li, timigite palpebrumante, ekkuris la hundo.

— Ĉu estis vi, kiu pafis? — demandis Silentulo, kiam Forĝisto atingis la siajn.

— Mi.

— Kaj kio al vi estis ordonita? Ĉu pafi?

Forĝisto respondis nenion. Silentulo intencis insulti, sed fiksrigardis Teodozon, pensis kaj prononcis pace:

— Evidente, ankaŭ vin tio finfine atingis. Jen kiel okazas. Do, kio, nun kun vi eblas ankaŭ en arbarojn iri aŭ pli malproksimen — predon ĉasi.

En la sama tago la viroj sub gvido de Silentulo kaŝiĝis en sovaĝa ĉedvina arbaro. Kun si sur ĉaro ili forveturigis ankoraŭ tute malfortan rudriston Rjabov-on.

3. Remezov

En la arestejo subkolonelo Remezov vokis gardistojn, restis kun ili vid-al-vide, longe rigardis al ili, pleniĝante de kolero, poste kuspis la manikon kaj, turninte en la aero la grandegan ruĝan harkovritan pugnon, tondre kriis:

— Ĉu vi vidis? Se eĉ unu haro falos de lia kapo...

La gardistoj ekriverencis, ekĵuris per Dio, ekbatis sin al la brusto.

— Ĉi kapitan-komodoro estas ŝtata krimulo! — ree ekparolis Remezov. — Se al li io okazos — de vi oni eĉ cindron ne trovos...

La gardistoj ree ekriverencis.

Remezov pelis la gardistojn for, enpensiĝis, poste laŭ putraj, glitaj ŝtupoj malleviĝis malsupren, en la malhelan kameron, kie sur fojno kuŝis Silvestro Petroviĉ.

— Ĉu monon vi ne bezonas? — per severa voĉo demandis la subkolonelo.

— Ne bezonas! — respondis Ievlev.

Remezov eksidis sur la benkon, petis:

— Rakontu, kapitan-komodoro, ĉion kiel estas. Mi ĉi tie ne restos, kaŝe rajdos al Moskvo, mi la veron devas scii...

Silvestro Petroviĉ rakontis ĉion kun detaloj. Remezov

elaŭskultis atente.

— Se estos io, kapitan-komodoro, tenu vin firme. Kio estis dirita, tion repreni ne eblas. Se vi cedos — skribos oni pri vi mensogon, kie tiam serĉi veron?

Ievlev silentis.

— Ankoraŭ estas malfeliĉo, ke via rudristo dronis! — diris Remezov. — Kial vi silentas?

— Tial mi silentas, — mallaŭte, per trankvila voĉo respondis Silvestro Petroviĉ, — tial, sinjoro subkolonelo, mi silentas, ke mi pensas: la svedon ni frakasis, la ŝipojn por la rusia floto nombre dek tri ni konservis, la popolo en Arĥangelsko ne estis damaĝita, orfoj, kaj edzinoj, kaj maljunulinoj por ni al Dio preĝas. Do, malfeliĉo ja ne estas. Al Apraksin en Moskvo unue rakontu: la ŝipoj estas sendifektaj, kaj ankoraŭ svedaj estas kaptitaj, li kalkulu — kun profito ni militis...

La korpulenta subkolonelo malgaje subridis:

— Ja vi, kiel mi vidas, estas strangulo, sinjoro kapitan-komodoro. Nu, Dio juĝu vin...

Li leviĝis, en mallumo palptrovis la manon de Ievlev, karese premis:

— Adiaŭ! Vian edzinon mi vizitos, ankaŭ la filinojn. En Moskvo vi nomis familion de Ĥilkov-oj?

— De Ĥilkov-oj. Ankaŭ de Izmajlov...

Remezov eliris el la arestejo, dum irado timigis la gardistojn per globigitaj okuloj, ĉirkaŭrigardis, enseliĝis...

Sur la strato, retenante la ĉevalon, Remezov demandis

preterirantan junan virinon:

— Kara, kie estas al Ĥolmogoro vojo?

La junulino almontris, la subkolonelo skurĝis la virĉevalon, ekrajdis al la ĉefepiskopo Vaga kaj Ĥolmogora — por konsilo, kiel petis Silvestro Petroviĉ.

La eminenco akceptis Remezov-on en la dormoĉambro — li estis grave malsana, — nenion sciis pri la incidento kun Ievlev. Ne aŭskultante Remezov-on, li ĝoje ekparolis:

— Frakasis, frakasis ni la damnitan svedon, la unuan fojon plene frakasis, jen ĝojo, jen miraklo...

La okuloj de Atanazio en krepusko de la dormoĉambro lumis, kiel ĉe junulo, li plu ĝojis, laŭ la vortoj de Jegorĉjo rakontadis al Remezov tiel, kvazaŭ mem vidis, kiel la antaŭa ŝipo estis surgrundigita, kiel akorde ekparolis la kanonoj de la fortreso kaj la Marka insulo, kiel la svedoj estis kaptitaj sur la insulo kaj kiel rusaj flagoj estis levitaj sur la kaptitaj svedaj ŝipoj. La subkolonelo aŭskultis, silente kapjesadis.

— Sed kial vi ne estas gaja? — demandis la eminenco.

Remezov suspiris, rakontis, kiel antaŭ nelonge estis arestita Ievlev. Atanazio leviĝis sur la kubuto, kriis:

— Mensogas vi! Ĉion mensogas! Ne povas tio esti...

La subkolonelo ne respondis eĉ vorton. La eminenco por longe enpensiĝis, poste diris:

— Malbone!

Kaj ripetis:

— Malbone, frato, malbone!

Li eksidis sur sia grandega, luksa lito — sekiĝinta, maljuna, en noktoĉapo sur la hirta kapo; senhelpe ĉirkaŭrigardante, plendis:

— Kion povas fari vero kontraŭ malvero? Jen vi jam estas grizhara, sed ĉu multe vi vidis, ke la vero estus pli forta, ol malvero? En malliberejon trafi, sub areston, al torturistaj manegoj — estas facile, rapide, sed eliri, ho, infano, ho kiel malfacilas el ĝi, damnita, elŝiriĝi. Kion fari? Al kiu iri por favoro? Kiu ne timos al Petro Aleksejeviĉ mem vorton diri? Ĉu vi? Kian vorton vi, stulta, elparolos, se vi mem estas de la pafistaj regimentoj, vi mem estas de tiu serpenta gento, kiu faris la ribelon? Ĉu oni kredos al vi kontraŭ bojaro princo Prozorovskij? Jen malfeliĉo, ke Ievlev Silvestro Petroviĉ kun forpasinta sinjoro Krikov estis en amikeco, kaj ĉi Krikov fare de la vojevodo estas deklarita ribelulo. Haltu, silentu, ne parolu, lasu min pensi, cerbumi...

La servisto alportis al la gasto vespermanĝon, la eminenco glutetadis malvazion, rigardis per kaviĝintaj okuloj al flagranta en angulo lucerno, meditis. Poste, fleksante la maldikajn fingrojn de la nodoplenaj manoj, komencis kalkuli, kio estas malbona:

— Unue, amiko, estas malbona tio, ke fremdlandanoj estas enmiksitaj en ĉi afero. Fremdlandanon en Rusujo oni nun favoras, kaj tiel fariĝis, ke ju pli li, kanajlo, friponas, des plian fidon oni al li donas. Dua malbono estas — princo Prozorovskij estas en granda favoro de la Siro ekde la Azova ribelo mem. Ankoraŭ estas malbono — la sveda militisto en ruĝa kaftano. Tiu afero ankaŭ por mi mem estas malklara. Kvara malfeliĉo — la rudristo ne estas viva. La kvina — vi kun

viaj pafistoj malfruiĝis, por Prozorovskij profite. Kaj la plej supera malbono estas, ke ĉio, kara amiko, estas sciate de kies manoj faro, sed estas malklara, kaj tordita, kaj implikita. Kiel ni nun la veron trovu?

Atanazio ree eksilentis, pensante. La subkolonelo sidis, mallevinte la kapon, alpreminte la polmojn al la genuoj, kuntirante la grizajn brovojn.

— Kaj la plej malbona el ĉio, — mallaŭte, konfide aldonis Atanazio, — la plej malbona estas, ke ne ĉiuj komprenas la nunan tempon kiel necesas — kaj per la koro kaj per la menso. Ne ĉiuj deziras pripensi, laŭ kiu vojo Rusujo ekiris. Ili nur vidas, ke estas malkvieto kaj renversado, ke ne laŭ la ava maniero, laŭdire, ni vivas. Ĵetas vantuloj vortojn per malsaĝaj buŝoj: se iu lando ŝanĝas sian moron, tiu nelonge staras; la barbojn oni bedaŭras, la kaftanojn longajn, siajn ŝtelajn profitojn. Ankaŭ al Petro Aleksejeviĉ estas malfacile. Estas multe da perfido, ŝtelado, korupto, flatado, kalumnio, malicaĵoj. Kiel ĉi tie eltrovi — kiu estas blanka, kiu estas nigra?

Ili rezonadis longe.

Antaŭ la nokto la eminenco ordonis doni al si plumojn, inkon, paperon plej bonan — skribi leteron al la Siro. La servisto metis apud Atanazio skatolon por skribo, kandelingojn kun kandeloj, sukeran akvon. Remezov, por ne malhelpi, eliris sur la peronon. Sonore, sed malforte, interrompante unu la alian per nelaŭtaj triloj kaj gaja krakado, kantis en la ĉefepiskopa ĝardeno najtingaloj. La subkolonelo rimarkis:

— Jen, kiel malfrue nun ili kantas...

La juna servoknabo, turninte al Remezov la palan vizaĝon, diris kun rideto:

— Tio, sinjoro, estas ne najtingaloj. Tio estas niaj birdoj, nomataj blugorĝuloj. Najtingalon blugorĝulo ne atingas, sed por ni taŭgas, por ni estas plaĉe ankaŭ ĝin aŭskulti. Najtingalo ja trans Sviron[118] ne flugas — kion ĝi ĉe ni en malvarmo faru, sed blugorĝulo ĉe ni ĉiam per sia kantado konsolas...

— Jen, blugorĝulo! — diris, aŭskultante la klakadon, la subkolonelo.

— Vere, blugorĝulo...

— Kaj vere, kiel nia najtingalo ĝi penas trili. Jen kiel alte prenas! Ĉu?

— Penas, sed malsukcesas. Tamen ne najtingalo!

Ĉe mateniĝo Remezov ree enseliĝis. Ankoraŭ pli laŭte, pli sonore kantis blugorĝuloj en malhelaj grupoj de arboj de la ĉefepiskopa rosa ĝardeno. Atanazio, starante sur la perono — malgranda, kurbigita de la malsano, — tusis, diris:

— Kiam Vologdon vi preteros, penu, subkolonelo, se nokte — kun homoj veturi. Vi estas korpulenta, riĉe aspektas, via ĉevalo estas bona, la selo garnita, la sabro en arĝento, kaj sur la vojo petolas bojaridoj, forte petolas. Kiam iri al la cara servo, ili forestas — pro tio nomiĝas «foruloj», — sed kiam en arbaro rabi — tuj iras. Damnitaj vojevodoj de ili koruptaĵon prenas, timas kapti, iuj eĉ simple kun tiuj arbaraj bojaroj akiron dividas. Kaj kion diri pri arbaro — en urbo Jaroslavlo mem preter ili iri ne eblas, ĉie ili vagas, savu Dio... Nu, veturu, amiko.

---

118 Sviro — rivero inter la Onega kaj Ladoga lagoj. *(trad.)*

La virĉevalo, snufante, ĵetante antaŭen la maldikajn bonrasajn krurojn, facile eliris ekster la pordegon. Remezov reĝustigis sin en la selo, enspiris plenbruste puran matenan aeron, de holmeto ĉirkaŭrigardis larĝajn, en malpeza nebulo herbejojn, kvietan Dvinon, la rozkoloran ĉielon.

Dum la tuta longa vojo ĝis Vologdo la subkolonelo rememoradis Ievlev-on kaj kun ĉiu horo firmiĝadis en la penso, ke Ievlev estas kuraĝa kaj honesta militisto kaj ke li, Remezov, sukcesos dispeli la kalumnion kaj denuncon de Prozorovskij.

Noktante en gastejoj, li dormis nemulte, ne drinkis vodkon, pensadis, kaj ju pli proksima estis Moskvo, des pli li kredis je bona fino de sia malfacila afero.

Trairinte Jaroslavlon, Remezov, ne atendante kunvojaĝantojn, kiuj ne estis jam dum pli ol tagnokto, ŝarginte la pistolojn, decidis veturi sola. La mastro de la gastejo longe kaj kun signifo en la voĉo persvadadis la subkolonelon nokti, sed li obstinis kaj, gaje adiaŭinte, tuŝis la ĉevalon per la spronoj.

La nokto estis malluma, humida, senstela.

Remezov veturis rapide, kantetadis aŭditan dum la vojo kanton, kalkuladis, kiom ankoraŭ restis da veturado.

En arbaro, en kaveto, la ĉevalo subite stumblis per la antaŭaj kruroj, falis. En la sama momento strecita ŝnuro tranĉis Remezov-on al la vizaĝo. Li estis elĵetita el la selo, batiĝis per la nuko al ĉevoja arbostumpo kaj mortis tuj. Homoj en bondrapaj kaftanoj, strikte zonitaj, kun tranĉiloj kaj pistoloj, disŝiris lian vojan mantelon, detranĉis la monujon, demetis la multekostan zonon, la sabron.

— Sur la ĉevalo sakojn rigardu, — potence ordonis juna voĉo. — La vera trezoro, verŝajne, estas tie...

— Vi, princido, havas la monujojn! — respondis voĉo de la vojo. — Alia ne estas...

La princido plu serĉis sur la korpo de Remezov ankoraŭ ion, trovis falditan kaj sigelitan leteron, turnis ĝin, ŝiris kaj forĵetis. Lian amuleton kaj lian oran kruceton li metis en la poŝon, kriis:

— La ĉevalon do mortpafu, diabloj ŝiritaj. Suferas la ĉevalo...

Sur la vojo, sub pluvo, oni ekridis:

— Ĉevalon li kompatas. Jen, bonkora iĝis. Eble, ankaŭ la subkolonelon vi kompatas?

Preninte la korpulentan Remezov-on ĉe la manoj kaj la piedoj, la servutuloj kaj servistoj portis lin tra la arbaro al ravino, balancigis kaj ĵetis la korpon malsupren.

— Tiel ili eĉ la propran patron murdos! — nelaŭte diris maljuna servisto. — Sia sian tranĉas...

— Sed por vi kia malĝojo? — demandis alia servisto, pli juna. — Ĉu vin tio zorgigas? Ili voru unu la alian, ĉiel malpli sur nia kolo sidos.

Sur la vojo en monotona bruo de pluvo obtuze krakis pistola pafo — la kompatema princido mortpafis la ĉevalon.

4. Timas la vojevodo

Antaŭ longa vojo la vojevodo longe instruis Meĥonoŝin-on, kiel konduti en Moskvo kun la Siro kaj aliaj potenculoj, al kiu

riverenci en la germana kvartalo — Kukujo, kiun pridonaci en kancelarioj. La leŭtenanto mordadis la lipojn, rigardis en la muron, preter la princo — maltrankvilis. En la korto en densiĝanta krepusko balancadis la kapojn ĉevaloj, tintigadis sonoriletojn, la maljunaj fraŭlinoj princidinoj estis ordonantaj al la servistoj meti por la leŭtenanto en la kaleŝon manĝon por vojaĝo.

Servosoldato donis al Meĥonoŝin mantelon, servisto de la vojevodo aliris pli proksime kun pleto — drinki antaŭ la foriro. La princo mem verŝis grandan kalikon, princino Eŭdokia alportis ĝin per siaj manoj. Meĥonoŝin renversis la vodkon en la malfermitan buŝon, el la polmo almanĝis maceritan vakcinion. La princino eklamentis:

— Por kio vi nin forlasas, fileto, turmentiĝos la princo en klopodoj, kiel al li estos sen vi kun liaj malsanoj...

— Ĉit, stultulino! — stamfis Prozorovskij. — Iru for de ĉi tie, ne necesas...

La princino, plorlamentante, foriris, la vojevodo plu instrukciis:

— Pri Ievlev, se li mem ne demandos, silentu. Se demandos, rakontu kun malgajo — tiel, diru, kaj tiel, la vojevodo-princo ne kredas, kredi estas terure. Sed pro suspekto ni prenis sub areston. Kaj la suspekto estas, ke estis li proksima amiko de via, Siro, latrono kaj malica krimulo Krikov... ĝuste ĉi tie pri la pafistoj menciu, kaj ruze: ke estis iuj fiaj venintoj en Arĥangelsko, ribeluloj kaj instigantoj el Azovo, latronoj. Pri tiu antaŭlonga krimo sur Dvino-rivero rememoru, pri la murdita homo. Kaj viajn okulojn malsupren turnu ĉiam, kvazaŭ timas vi lin, patron-caron, kolerigi. Por li la pafistaj aferoj fariĝis osto

en la gorĝo, li pro tio tuj koleriĝos. Ankoraŭ la pridemandan folion de Longinov, kaj kion la fremdlandanoj pri Ievlev skribis — al li mem en la manojn donu. Kaj ne hastu, — ĉu vi komprenas, por ke ĉi damnita Silvestro pro paso de tempo ĉi tie en la malliberejo sub aresto mortu. Li estas malforta, vundita, eble gangreno okazos, ĉi tie ni lin entombigos...

Meĥonoŝin severe interrompis:

— Staranta akvo muelradon ne movas, princo-vojevodo. Mallibero povas esti malsama. Se vi ektimos, pereos ni. Faru racie, li putru vive, hundaĉo. Alŝutu al li, diablo, en kaĉon aŭ en supon venenon, — kaj adiaŭ. Amikojn li havas en Moskvo — kaj Menŝikov kaj Apraksin, kaj aliaj famaj viroj por li viva kiel muro staros, sed se li mortis — nenion ili faros. Pri tio pensi necesas...

La princo akompanis Meĥonoŝin-on ĝis la kaleŝo, krucosignis lin trifoje, kisis. La maljunaj fraŭlinoj princidinoj staris apude, kaŭriĝis riverence laŭ la nova modo, petis ne forgesi ilian deziron: alveturigi el Moskvo friziston, por ke tiu konstruu hararanĝojn kaj metu muŝojn. Meĥonoŝin promesis. La kaleŝo ekveturis, knarante, balanciĝante; eksonoris la vojaj sonoriletoj...

Kaj en la sama nokto, kiam forveturis Meĥonoŝin, ĉio ekiris pene-svene, dise-mise: tuj kiam la princo kuŝiĝis dormi, venis kancelariano Abrosimov kun terura sciigo — la fuĝintaj rabistoj, kiuj loĝis sur la Marka insulo, ne lasis sin kapti al la pafistoj, foriris en arbarojn, multaj kun armiloj, prenitaj de svedoj, kaj kiam estis aranĝita persekuto, tiam ili komencis pafadon kontraŭ la pafistoj kaj dumaanon Larionov-on mortigis malice. Tamen, Larionov-on ili mortigis ankoraŭ antaŭ la

komenco de ĉi persekuto, sed la kvindekestron kaj ankoraŭ kelkajn pafistojn ili mortpafis ĉe arbara rando...

La dumaanon oni enportis en la princajn ĉambrojn, kuŝigis sur bastomaton, sur la plankon, sub la ikonojn, ligis al li la makzelon per tuko, sakristiano komencis legi libron-psalmaron.

— Por kio ĉi tien do, por kio al mi? — per ploranta voĉo kriis la vojevodo. — Vi portu lin en la preĝejon, ŝtipkapuloj...

— En la preĝejon la popolaĉo ne permesas! — kun suspiro respondis Abrosimov. — Ili minacas lin el tie elĵeti...

Kaj li ree ekparolis, ke la fuĝintaj rabistoj estis la iniciatintoj de ĉiuj malfeliĉoj, ili ankaŭ la kaŝan petskribon pri la princo skribis, kaj kvankam foriris la rabistoj en arbarojn, sed en la urbo ili havas proprajn homojn, tiuj homoj en Arĥangelsko ribeligajn vortojn lanĉas kaj ĉiel minacas, ke venĝitaj estos al la vojevodo liaj maljustaĵoj, koruptaĵoj, subpremoj, ankoraŭ bruligos ili lian palacon, surmetos la kapon sur palison kaj post li la familion ekstermos...

— Ho Dio, kaj mankas konsilantoj, mi estas solsola! — ekkriegis la vojevodo. — Larionov estas murdita, la leŭtenanto al Moskvo veturas...

Globigante la okulojn, li eksidis sur benko, ordonis voki al si Vilhelmon Noble-on kaj Remezov-on. La fremdlandano venis tuj, sed Remezov-on oni nenie sukcesis trovi — lin kvazaŭ la tero englutis.

— Kaj lin, kaj lin oni murdis, — ekbalbutis la princo, — sentas mia koro, oni murdis la subkolonelon...

En timo li ordonis voki la malfavoratan nun pafistan estron Simonon Borisoviĉ-on. Tiu venis ne sola, sed en akompano de

morna Ĥagajo Pustovojtov. Nek la pafista estro, nek Ĥagajo deziris eksidi, staris foste ĉe la pordo. Vilhelmo Noble ĵetadis al ili timajn rigardojn, silentis. La vojevodo ekturbulis, ekparolis kaĵole, ke estas malfeliĉo, ĉio estas malbona, granda krimo estis farita, la fidela cara servanto dumaano Larionov estis malice murdita, la fuĝintaj servutuloj kaj malnobluloj foriris en arbarojn, tiel eblas atendi ribelon... Ĉi Larionov, nun forpasinta...

— Laŭmerite oni lin murdis! — per obtuza baso sentime interrompis la vojevodon Ĥagajo Pustovojtov. — Ne iru, rufa muzelo, laborulojn aresti. Ili kontraŭ la svedaj trupoj batalis brave, ili la baterion sur la Marka insulo savis, kaj ilin — en malliberejon?

Prozorovskij eksplodis pro la arogantaĵo de Ĥagajo Pustovojtov, komencis krii, sed al li paŝis Simono Borisoviĉ, grincis per la dentoj, ekparolis per mallaŭta pro kolero voĉo:

— Ĉu freneziĝis vi, princo? Kion vi faras? Kiun vi arestas? Sinjoron Ievlev-on kapitan-komodoron vi enprizonigis? Se estus la savinto de la urbo rudristo Rjabov viva, ĉu vi ankaŭ lin kaptus? Pro kio honestan homon, kuraĝan junulon Pustovojtov-on Jegoron vi en subteraĵo tenas? Ĉu pro tio, ke li per ŝipatako svedan ŝipon kaptis kaj sur tiu fregato la rusian flagon levis? Ho, princo-vojevodo, ni ĉiuj mortos, grandan pekon vi sur vian animon prenis. Ŝlosiĝis vi trans via palisaro — kaj tion ne scias, kion en la urbo la popolo diras! Ĉio mise nun iras, ĉio dise, ĉio al malbono. Ĉu vi pensas, ke ne scias homoj, kiu ĉe la vojevodo estas la dekstra brako? Ĉu ili ne scias pri dragona leŭtenanto Meĥonoŝin? Ĉu vi pensas, ili forgesis, kiel ĉi judaso, sian militistaron forlasinte, de la batalo fuĝis?

Rekonsciiĝu, princo! Tuj liberigu el la prizono Silvestron Petrovič-on, Pustovojtov-on Jegoron, fiŝiston Longinov-on...

La vojevodo batis per la pugno la tabloplaton, kriis alte, ŝrike:

— Leŭtenanto Meĥonoŝin por vi estas judaso, kaj latrono Ievlev estas venkinto de la svedo? Tro rapida vi estas, sinjoro pafista estro, rapida kaj kuraĝa, tamen kuraĝa kie ne necesas! Pensis mi — prudentiĝis Simono Borisovič, malvarmiĝis en frosto, divenis, kiu estas latrono, kaj kiu pri la urbo zorgas. Sed ne, kia vi estis, tia vi restis — insultanto, obstinulo. Do, nenion eblas fari, eble! Eksigos mi vin de via servo. Sinjoro Noble ekde la nuna nokto estu la pafista estro, al li latronoj, kaj spionoj, kaj veraj judasoj ne estas amikoj, nek kamaradoj, nek fratoj...

Simono Borisovič fiere levis la kapon:

— Ne de vi mi estis enpostenigita, ne vi min forpelu.

— Mensogas vi! — moke kriis Prozorovskij. — Mensogas! Vi estas estro de pafistoj, kaj ĉiuj vi por la Siro estas latronoj kaj ofendintoj, ĉiujn vin malfavoras Petro Aleksejevič, ĉiuj vi por li estas maliculoj. Ne vane oni diras: ĉiu pafisto estas kiel dento. Ne kompatos oni vin en Moskvo, kaj mi al tio helpos...

Ĥagajo Pustovojtov diris kun angoro:

— Ni foriru, Simono Borisovič, kion ni faru ĉi tie...

La pafista estro turniĝis al Ĥagajo, ne riverencinte al la vojevodo, peze paŝante, ekiris al la pordo...

Vilhelmo Noble sidis sur la benko, ĉiam silentis, rigardis al la vojevodo per nekomprenebla rigardo, maĉis la pinton de la

longaj lipharoj.

— Remezov kie estas via? — demandis la vojevodo.

La fremdlandano ŝultrolevis.

— Eble, ankaŭ lin oni murdis?

Noble ree ŝultrolevis.

— Parolu! — ordonis Prozorovskij. — Kial vi silentas? Vi ekde nun estas la pafista estro, mia konsilanto, helpanto fervora, defendanto. Do konsilu, — mi ja sola estas, solsola. Meĥonoŝin leŭtenanto al Moskvo veturas, — kion mi faru nun?

— Mi faros ĉion, kion vi al mi ordonos! — respondis finfine Vilhelmo Noble. — Mi estas militisto. Sed mi en viaj aferoj nenion komprenas kaj nenion deziras kompreni. Mi nur servas ĉi tie. Viaj kancelarianoj skribu al mi viajn ordonojn sur papero, jes, jes, sur papero. Kaj tie sur folio estu via subskribo. Tiam mi faros. Sed sen folio kun via subskribo — mi nenion povas, ĉar mi havas familion kaj responsas pri ĝi antaŭ la Plejalta. Tiel.

— Jen kia vi estas! — diris Prozorovskij.

— Jes, tia! — prononcis Noble. — Nur tia, kaj ne alia.

— Ruza ansero!

— Mi estas maljuna ansero! — diris Vilhelmo Noble. — Mi servis al multaj regnestroj, kaj nun mi saĝiĝis. Estu papero...

Li eksilentis. Prozorovskij snufis, ne sciante, kiel agi. Trans la pordo estis interflustrantaj la maljunaj fraŭlinoj princidinoj, oĥanta maltrankviligita de la noktaj gastoj princino Eŭdokia. La princo ree ion ektimis, liaj manoj subite ektremis, la koro ekdoloris. En la korto subite ŝajnis fremdaj voĉoj, li

fiksaŭskultis, — ne, la voĉoj estis de propruloj, estis babilantaj la ĉevalistoj...

Subite malfermiĝis la pordo, venis kancelariano Abrosimov, alportis malbonajn sciigojn: apud la arestejo, malgraŭ la malfrua horo, amasiĝas metiistoj, matrosoj, soldatoj — krias, insultas la vojevodon, la kancelarianojn. Al la torturisto Pozdjunin oni trabatis la kapon per ŝtono, al la senteruloj-helpantoj same batis la flankojn. Virinoj trovis iun fremdan ĉefpopon, tiu sentime faris por Silvestro kaj por la mortigita rudristo Ivano diservon en la preĝejo de Sankta Paraskeva. Virinoj kaj soldatoj, matrosoj kaj portistoj tiel ĉirkaŭis la preĝejeton, ke en ĝin ne eblas trapuŝiĝi. Kaj la rajdistojn ne eblas kunpeli, ili timas pro malfrua tempo eliri sur la straton.

La vojevodo elaŭskultis, ordonis al Vilhelmo Noble elirigi siajn pafistojn.

— Paperon! — per griza voĉo respondis Noble.

Prozorovskij diktis al la kancelariano la paperon. La nova pafista estro, movante la lipharojn, legis la vojevodan ordonon, gardeme kaŝis en la brustan poŝon, surmetis la gantojn. La vojevodo ordonis doni al si peltmantelon, ĉapon, sabron. Lia vizaĝo iĝis tute grizbruna, kiam li ĵetis rigardon, elirante, al la akriĝinta blanka nazo de la dumaano...

Eksidante sur ĉevalon, li ordonis al la servistoj gardi la domon kiel propran okulon, neniun enlasi sub minaco de morto, neniu dormu, eĉ duone.

Malantaŭe, tintante per la armiloj, interinsultante, sonorigante piedingojn, estis enseliĝantaj pafistoj, ĉasistoj, la eskorto de la princo-vojevodo.

Elveturante el la pordego, Prozorovskij ankoraŭ ne sciis, kion li faros, pensoj neniel povis kuniĝi en lia kapo, la koro batis ofte, kiel ĉe pasero, la timo ne ĉesis, sed kune kun la timo li jam sentis alfluon de tiu kuraĝo, kiu estas tiel karaktera por malkuraĝuloj, kiam temas pri ilia propra vivo.

Post ne pli ol horo Vilhelmo Noble starigis sur la stratoj barierojn, ĉe kiuj estis ordonite deĵori al gardantaj pafistoj el la novaj regimentoj. Tra la silentiĝinta urbo Prozorovskij sendis raziojn — kapti vagabondojn, trampojn, fuĝintajn servutulojn, treni ilin en la arestejon. Ĉe la palisaro apud la malliberejo estis starigitaj rajdistoj kun lancoj kaj ŝargitaj muskedoj. La kuraĝan ĉefpopon, kiu servis por Silvestro en la preĝejo de Sankta Paraskeva, oni kaptis kaj ĵetis en la kavon. Du fiŝistajn edzinojn, kiuj nomis la princon per insulta vorto, oni trenis por puno al Pozdjunin. La kanonojn, kiuj staris antaŭe por gardo kontraŭ la sveda latrono, la princo-vojevodo ordonis turni al la vojoj, kondukantaj al Arĥangelsko, ŝargi per mitrajlo, pafi por ajna gardo — senkompate.

La urbo silentiĝis, kaŝiĝis. Ĉie estingiĝis fajroj.

Ĉapitro tria

> Du brulaĵoj eĉ en kampo fumas, sed unu eĉ en forno estingiĝas.
>
> *Proverbo*

1. Por la vero kaj justo

Mateniĝis.

Dormeme, enue, raŭkete intervokadis virkokoj en Moskvaj stratetoj. Noktaj gardistoj, foriginte la barierojn, estis forirantaj dormi. Sonorilistoj, surĵetinte ŝiritajn peltmantelojn, kuntiriĝante pro aŭtuna malvarma humido, insultante sub vento, atendis sur kampaniloj, kiam batos la sonorilturo Ivano la Granda, kaj dume jam treniĝis al bazaroj, tondrante sur pavimo, knarante per neŝmiritaj aksoj, ĉartrajnoj kun vivaĵoj, kun salviando, kun fiŝo, kun apudmoskva ĉasaĵo, kun mortigitaj anseroj, kun brulligno. Komerckortanoj, firme fermante post si pordetojn, fervore krucosignante sin al la kupra, basa, longa sonoro, iris komerci, tavernistoj estis malfermantaj carajn drinkejojn, tabakisto — sian novmanieran butikon, virinoj kun patkukoj, kun pirogoj, kun ajlaj bulkoj laŭdadis sian varon, kovritan per grasmakulitaj ĉifonoj. Tombistoj sur bastomatoj portis korpojn de homoj, murditaj nokte de rabistoj, al la kruciĝejo ĉe Sankta Barbara por identigo fare de la parencoj. Gardistoj trenis iun korpulentan, grizharan, sen ĉapo, — li estis amare adiaŭanta al kurantaj post li virinoj. Preterpasanta viro kun malica ĝojo diris:

— Jen, kaptiĝis. Prenis oni finfine la Dian sklavon...

— Ĉu rabisto? — demandis Silentulo.

— Kial rabisto? Bojara filo. Li nun jam kvindekjariĝis, sed ĝis hodiaŭ estis kalkulata «forestanta», skribata kiel juna bojarido. Do, jen nun oni lin ektrenis. Nun li servu...

Moskvo estis vekiĝanta.

Dum irado manĝetante, kuris laborantoj trans Neglinkon, al la Kanona korto, trans Moskvo-riveron, al la Voroneĵa vojo — al metiejoj, al fandejoj, lignaĵejoj, teksejoj. Popoj kun deca kantado ekportis sur la manoj, sur tukoj, miraklan ikonon al biendomo de ekmalsaninta bojaro. Ĉevala militistaro per senfina torento, vico post vico estis movanta sin sur la strato, la soldatoj morne rigardis el sub larĝaj randoj de ĉapeloj, la oficiroj kaŝadis la mentonojn en skarpojn, tralasante antaŭ si la kavalerion, komandadis novmaniere, per nekompreneblaj vortoj. Post la kavalerio veturis novaj kanonoj, kanonistoj en la ĉaroj saltetadis sur benkoj, — tian kaj Silentulo, kaj Teodozo Forĝisto ankoraŭ ne vidis.

— Ĉu vi vidas, kiaj estas kanonoj? — demandis Forĝisto.

— Grandaj! — diris Silentulo.

Forĝisto akompanis la artilerion per lacigita rigardo, alpremiĝis al barilo, fermis la okulojn. Silentulo maltrankvile ĉirkaŭrigardis — ili ne kaptiĝu antaŭ la fino mem de la vojo, tiris Teodozon je la maniko de la kaftano, diris nelaŭte:

— Ni iru, Teodoĉjo! Ja estas proksime! Aŭ — jen drinkejo, eble pro glaseto iĝos pli facile...

— Iru ĝi al diablo! — insultis Forĝisto.

Lia vizaĝo tute griziĝis, la haŭto iĝis seka, kvazaŭ ĉe

malvivulo, nur la pupiloj restis antaŭaj — brulis kiel braĝoj. Sur la tuta vojo al Moskvo — en arbaro kaj en gastejoj, en garbejoj kaj sur forno de bonkora kampulo — Forĝisto longe malfacile tusadis, neniam povis bone varmiĝi, manĝis malmulte, sen deziro. Ju pli proksime estis al Moskvo, des pli malfortiĝadis Teodozo, kaj en la lastaj tagoj Silentulo jam tute prepariĝis al tio, ke li entombigos la amikon apud vojo. Sed Forĝisto plu iris kaj iris, laŭte tusadis, kraĉadis kaj ne plendis, kvazaŭ estus sana, nur ĉiam esprimadis antaŭtimon:

— Ni ne kaptiĝu ĉe la bariero. Jen kian vojon ni trapasis, kio, se oni kaptos nin. Vi estas fuĝulo, mi estas por la vojevodo la unua malamiko. Oni katenos nin, kaj fino. Pereis nia petskribo...

Kaj kun timo en la okuloj li kaptadis la bruston, — tie estis enkudrita la valorega papero.

— Ni trairos! — konsoladis Silentulo.

La barieron ili ĉirkaŭiris, longe erarvagis inter apudurbaj domoj, legomĝardenoj, bariloj. Tiu lasta nokto multe kostis al Teodozo, li tute malfortiĝis, la kruroj tremis, glueca ŝvito de tempo al tempo aperadis sur la frunto, tuso disŝiradis la kavan bruston.

— Ĉu pirogon vi maĉos? — demandis Silentulo. — Bonaj pirogoj, kun viando...

— Ne...

— Eble, en preĝejon ni eniru, tie estas pli varme...

— Iru vi for kun viaj preĝejoj...

Finfine ili ekiris pluen. Silentulo demandadis pri la vojoj,

pasantoj indikadis malsame. La domon de Poluektov ambaŭ vojaĝantoj atingis tute senfortaj. Silentulo longe frapadis al la pordego, neniu respondadis, eĉ hundoj ne bojis trans la alta barilo, kovrita de musko. Teodozo sidis sur trabo — spiris ofte, raŭke.

La pordegon malfermis la maljuna servisto Pafnutjiĉ, el sub la polmo, per larmantaj okuloj ekrigardis al Silentulo, demandis, kiun li bezonas.

— Riverencon al vi de Taisja Antipovna! — respondis Silentulo.

— Kiu Taisja Antipovna?

— Ja tiu virino bona, ĉe kiu loĝas nun la edzino de kapitan-komodoro Ievlev — Maria Nikitiŝna.

— Ĉu kun la riverenco vi venis el Arĥangelsko?

— Kun afero ni venis, kaj ĉar Moskvo por ni estas urbo nekonata, do decidis ni, avĉjo, de vi konsilon peti...

— Kion mi povas konsili! — suspiris la avo. — Vidu, maljunas mi, kiel putra arbostumpo, apenaŭ la piedojn trenas. Kaj afero via, karuloj, estas, ho, malfacila. Rodiono KirilovIĉ, la adopta patro de Maria Nikitiŝna, ĉiam pri tiu afero cerbumadis, sed mortis, ne ĝisatendinte ĝian bonan finon...

Forĝisto plu tusis. Sub grizaj nuboj, malalte rampantaj super Moskvo, estis stride krianta kornikaro. La maljuna pordegisto suspiradis, kun kompato rigardis al la vojaĝantoj: ili estis tro elturmentitaj, ĉifonaj, ronĝitaj de malsato kaj malvarmo.

— Kia do estas via afero? — demandis Pafnutjiĉ.

— La caron-patron ni serĉas.

— Kaj li vin, certe, atendas. Por kio do vi lin serĉas?

— Por la vero kaj justo, avo. Enlasu nin ripozi. Malsanas mia kunulo, kaj ankaŭ mi laciĝis. Ni ne havas alian lokon por iri. Se ni restos tiel sen loĝejo en Moskvo — oni tuj kaptos nin, tiam ni pereos...

La maljunulo pensis iom, enlasis. Hirta kato, miaŭante, renkontis la gastojn. La maljunulo starigis sur breĉetitan tablon poton da senvianda brasiksupo, metis lignajn kulerojn, tranĉis panon. Silentulo, ne krucosigninte la frunton, eksidis manĝi, Teodozo rifuzis la manĝon, kuŝiĝis sur benkon, forturniĝis al la muro.

— Ne tro grasa estas via supo, avĉjo! — diris Silentulo.

— Kun akvo mi ĝin kuiris, — subridante, respondis Pafnutjiĉ.

Manĝinte, Silentulo same kuŝiĝis ripozi, kaj vespere, kiam la maljunulo bruligis kopekan kandelon, la vojaĝantoj konfidis al la avo tion, kion konfidis al neniu: rakontis pri la petskribo pri vojevodo Prozorovskij.

La maljunulo aŭskultis, glatumante sian hirtan katon, la kato estis trankvile ronronanta. Silentulo parolis, Forĝisto, tusante, sugestadis al li. Tra la malnova domo de forpasinta Rodiono Kirilovиĉ estis pasanta kolera aŭtuna vento, knaris per deŝiriĝinta ŝutro, hurlis en fornaj tuboj, — sed ĉi tie, en la pordega dometo, estis varme, kviete, odoris je bakita pano, je vakso.

Elaŭskultinte ilin, la maljunulo diris:

— Por vi ĉi tie ĉio estas nova, sed mi la vivon travivis, mi scias. Juston oni ne tuj trovas. Tiun juston homoj eble ekde la

naskiĝo ĝis la morta horo ĉiam atendas, ne povas ĝisatendi...

— Ni ne atendas! — interrompis Silentulo. — Ni por ĝi iras...

— La senco estas sama, ĉu atendi, ĉu iri. Rodiono Kirilovič, forpasinta, same sur la loko ne sidis. Kaj ĉe Apraksin li estis, kaj Menŝikov-on Aleksandron Danilovič-on vizitis, kaj Golovin-on mem atingis. Ĉiuj pro la malfeliĉo kompatas, ĉiuj anime helpi deziras, sed kiel — tion neniu scias. Atendu, ili diras, Rodiono Kirilovič, — kun tempo ni solvos. Kun tempo! Kaj venis de vi el Arĥangelsko oficiro — mi forgesis, kia estas lia nomo, — diras homoj, oron ne avaris kaj pro tio, aŭ pro io alia grandan forton akiris...

— Ĉu Meĥonoŝin? — demandis Silentulo.

— Ŝajne tiel, Meĥonoŝin. Tre favorata. Kaj bienon oni al li donacis, pro lia fervoro al la cara servo, kaj servutulojn multajn, kaj terojn kaj arbarojn... Oro — ĝi multon faras...

Forĝisto interrigardis kun Silentulo, diris raŭke:

— Oro! Kio pri oro? Ni ankaŭ oron havas, ne malriĉaj...

— Ĉu vi?

— Ni, avĉjo.

La maljunulo kun dubo balancis la kapon.

— Vi al ni direkton almontru! — petis Silentulo. — Vi al ni homon kun kapo donu, kaj ni repagos... Oficiston ruzan, kancelarianon spertan, ni ne nur dankos, ni pagos konvene...

Kaj, koleriĝinte, li elprenis profunde kaŝitan monujon, dense plenigitan per oraj moneroj.

— Jen! Rigardu! Ĉi tie da ĉervoncoj estas pli ol kvar centoj...

Pafnutjiĉ eksvingis la manojn, ekpalpebrumis, kvazaŭ blindigita, ekmiris — kun tia riĉo, sed mem estas malsataj, la botoj de Silentulo estas trivitaj, Forĝisto estas en bastoŝuoj.

— Ne nia mono! — severe diris Teodozo. — Por la afero estas mono! De tiu mono la vivo dependas de bona homo...

— Kaj ĉu vi mem malbonuloj estas? — same koleriĝis la avo. — Jen vi atingis, ke preskaŭ mortis! Kun kapo la aferon fari necesas...

Iom poste, antaŭ nokto, li surmetis peltan ĉapon, prenis en la manojn bastonon kaj ekiris al ruza kancelariano, al kiu li plurfoje iradis laŭ komisioj de forpasinta Poluektov. Al tiu kancelariano estis decidite la monon ne montri, sed doni unu ĉervoncon pro konsilo. Ankoraŭ malgrandan parton da arĝento ili elspezis por regalo — por ke la kancelariano sidu bone kaj revenu hejmen per gajaj piedoj.

La kancelariano estis ruza, akranaza, globokuleta, tuta kovrita de blanka kokideca lanugo. Sur lia kolo pendis sur rimeneto inkujo, ŝtopita per ĉifono, en saketo estis pintigitaj plumoj, tranĉileto, stampopapero. Drinkis li multe, manĝis same — ne eblis kompreni, kiel ĉio ĉi lokiĝis en li, kaj ĉe tio li estis magra tiom, ke la kaftano pendis sur liaj ŝultroj.

Post vodko kaj galantino li retrokliniĝis al la muro, klinis flanken la maldikan kolon, prepariĝis aŭskulti. Teodozo dekudris la volvaĵon, en kiu estis la petskribo, zorge malvolvis la folion, donis al la kancelariano. Tiu, klakante per la lango, suspirante, tralegis, levis al Forĝisto la globajn palajn

okuletojn, demandis — en kio do estas obstaklo, se la petskribo estas skribita kaj per sango subskriboj sub ĝi estas parafitaj? Forĝisto respondis, ke la obstaklo estas en tio, kiel doni ĉi petskribon en la carajn manojn.

— Jen, kiel doni! — subridis la kancelariano.

— Ĝuste pro tio ni al vi riverencas! — diris Forĝisto. — Instruu, estu por ni kiel patro.

— La Siro ja eĉ en Moskvo nun ne estas.

— Kion do ni faru?

— Ĝustan homon serĉu!

— Kie do lin trovi?

— Jen, kie trovi! — ree subridis la kancelariano. — En tio nur eraru — kaj vi pereos, per malbona morto mortos. Mi pensas, via vojevodo, princo Prozorovskij, ne avaros oron pro ĉi folio. Tion oni en ajna kancelario scias. Kaptos skribisto la petskribon, kaj rajdos al vojevodo Prozorovskij... Pensi necesas, poste fari...

Silentulo elprenis el la poŝo ormoneron, metis sur la tablon antaŭ la kancelariano. Tiu provis la moneron per la dento, miris, ke ĝi estas sveda, demandis, de kie ĝi estis prenita.

— Ĝuste de la svedo prenita! — enigme respondis Silentulo. — Pri ĉi monero eblus eĉ fabelon rakonti, sed mankas tempo nun...

— Sed vi rakontu! — petis la kancelariano.

— Ĉu rakonti, Teodozo?

— Rakontu! — respondis Forĝisto. — Eble, la kancelariano

pli favora iĝos al nia afero...

Ne hastante, per obtuza voĉo Silentulo rakontis al la kancelariano la historion pri la heroaĵo de Rjabov kaj pri la savo de urbo Arĥangelsko kontraŭ la sveda invado. La kancelariano aŭskultis, kapjesante, liaj okuloj ekbrulis, la lipoj ektremis, la kokida lanugo sur la vizaĝo ekskuiĝis. Snufante, li ĵetis la moneron reen sur la tablon, diris per mildiĝinta voĉo:

— Ankaŭ mi, fratoj, estas rusa homo, ne prenos mi tiun orfan monon. Li sian vivon ne timis fordoni por amikoj siaj, kaj ĉu mi pagon prenu de lia amara malfeliĉo? La hommanĝantoj sufokiĝu pro avido, sed mi ne bezonas, mi povas sen tio min nutri...

Kaj li ree komencis demandi: kie nun estas rudristo Rjabov, ĉu ne mortis ankoraŭ en mallibero sinjoro kapitan-komodoro Ievlev, kiel estis skribata la petskribo, ĉu plu same furiozas la princo-vojevodo. Silentulo kaj Forĝisto respondadis interrompante unu la alian, la globokula kancelariano aŭskultis penseme, sulkiĝadis, cerbumadis. Estis videble, ke li deziras helpi, serĉas, sed ne scias, kiel. Leviĝinte, li diris firme:

— Atendu. Morgaŭ mi venos. En Moskvo ne vagu, nun oni fuĝintojn forte kaptas, vi pereos pro nenio. Mi ekscios, per kio helpi, kiun el bonaj caraj amikoj kie trovi...

Dum la tuta longa aŭtuna nokto deliris kaj amare plendadis en deliro Teodozo Forĝisto: jen li arde disputadis kun la Dio kaj riproĉadis lin per la Sankta Skribo, jen demandadis, kiel la homo vivu, jen blasfemadis kaj minacadis sian malican malamikon morthaki per hakilo. Kaj terure estis aŭdi fragmentajn, raŭkajn, kolerajn kaj funebrajn vortojn en obskuro de la senfina nokto...

Matene Teodozo, ne leviĝante de la benko, pririgardante la nigriĝintajn polmojn, mallaŭte rakontis al avo Pafnutjiĉ, kiel li ekmalsanis: sveda kuglego dum la batalo batis al fortresa remparo, defalis briko, la kanono ekrampis malsupren kaj falus de la muro, se li ne kroĉiĝus al la afusto per ĉiuj fortoj. Dum alkuris aliaj kanonistoj, dum ili submetis platojn, dum levis per trabo, — li ĉiam tenis la afuston. Ekde tiu tago li komencis tusi sange.

— Okazas! — diris Pafnutjiĉ. — Ŝiris vi, karulo, la ĉefan vejnon. Nun preĝi necesas...

Forĝisto brilis per la okuloj, demandis la maljunulon:

— Al kiu preĝi, avo?

La maljunulo ektimis, ekpalpebrumis per la duonblindaj okuletoj:

— Kial vi? Kiel vi parolas...

Silentulo, kudrante la truiĝintan boton, paceme diris:

— Lasu, Teodozo, ne bruu. Kaj ekmalsanis vi, fraĉjo, multe pli frue. Jam kiam ni la ĉenon metis sur la Marka insulo — vi ĉiam tusadis. Ne gravas, kun tempo vi ekspiros. Ni nian aferon faros, foriros al Volgo, tie estas varme, la suno jen kiel brilas! Kumison vi trinkados, de ĝi granda utilo al homo okazas...

Teodozo silentis, hele rigardante antaŭ si, kvazaŭ vidis varmegan tagon super Volgo, la spegulon de la rivero, kvazaŭ varmiĝis sub la favora suno.

— Niaj viroj, eble, jam tie promenas... — diris Silentulo.

— Kiaj viaj?

Silentulo, ruze kaj mallonge subridinte, respondis:

— Niaj, avĉjo! Kiuj sur ĉeno sidi ne deziras. Diversaj viroj...

— Ĉu fuĝintoj?

— Nomu fuĝintoj...

— Kaj vi tio... — timeme diris la maljunulo, — vi pli kviete!

— Kaj ni jam eĉ tiel pli kviete!

Antaŭ frua krepusko venis, anhelante, la kancelariano, hastante, tenante la kapon klinita flanken, glutante vortojn, rapide rakontis ĉion, kion li sukcesis ekscii en kancelarioj: Menŝikov Aleksandro Daniloviĉ estas ĉu en Novgorodo, ĉu en Pskovo, serĉi lin estas malfacile — hodiaŭ li tien rajdis, kaj morgaŭ en alian lokon. Apraksin Teodoro Matejeviĉ estis antaŭhieraŭ en Moskvo...

— Estis, estis, certe, — konfirmis la avo, — estis preterveture, sed tamen trovis tempon — venis ankaŭ ĉi tien...

— Ĉi tien? — miris la kancelariano.

— Kaj kio! Ĉe ni eĉ Petro Aleksejeviĉ mem estadis, ne abomenis nian panon kaj salon. Librojn kelkajn al li, al la Siro, Rodiono Kiriloviĉ donadis. Kaj Apraksin al Ievlev Silvestro Petroviĉ estas bona amiko, kiel frato. Li venis, demandis, kiel sinjoro Poluektov mem mortis, rigardis la librojn kaj foliojn de la forpasinto, ordonis al mi kun tuta severeco: konservu, avo, kiel propran okulon ĉi riĉaĵojn. Nu kaj kio por mi? Ĝuste tio estas mia servo...

— Ĉu vi al li pri Ievlev nenion diris? — demandis Teodozo.

— Ne kuraĝis, patro mia. La afero estas delikata. Li povus

brui kontraŭ mi. Malfavoro cara estas malbeno malica, kaj mia afero estas serva... Juĝu mem — eĉ Rodiono Kirilovič nenion fari povis, — kion do mi faru? Eble, ankaŭ la vidvino penas...

— Kia tia vidvino?

— Ja Maria Nikitišna! Kiu homo estas en malliberejon kaptita — tiu estas kiel mortinto. Torturas oni nun forte, ne eblas elteni...

— Maljuna vi estas, avo, sed saĝon ne akiris! — kolere diris Teodozo. — Torturo! Scias ni, vidis...

— Nu, nu! — timeme petis la maljunulo. — Por kio ĉi vortoj...

La kancelariano interrompis signife:

— Jen pensas mi, homoj miaj bonaj, pensas kaj elpensis: vivas en Moskvo nur unusola homo plej forta, al la caro mem proksima, al li la petskribon doni estas kiel al Petro Aleksejeviĉ mem...

— Ni devas al la caro! — morne eldiris Silentulo. — Ni al la caro iras, ne alie.

— Jen kia vi estas! Ne alie, ol al la caro? Ne estas simple, barbulo, nun al la caro trafi. Celu malpli alte. Kaj malpli alte, sed pli proksime...

— Kiu do estas tiu via — malpli alte, sed pli proksime?

— Atendu, ne urĝu, tro terura estas lia sankta nomo, — sen krucosigno ne eblas eldiri. En lian pordegon al li neniu venas. La Siro mem sian kariolon sur la strato, apud la domo, lasas. En kaleŝo eĉ apude ne eksidas, kaj ĉiam kontraŭ, kaj vokas li lin, oni diras, besto. Eksidi antaŭ ĉi famega viro eĉ ne penu, kiu

ajn vi estu, kia ajn persono: grafo aŭ princo aŭ iu alia kavaliro. Antaŭ ol al li riverenci — necesas kalikon da pipra vodko eltrinki, kaj donas tiun vodkon neniu alia, ol kolera urso. Se ne eltrinkos vi la kalikon — la urso punos...

— Ĉu Romodanovskij? — morne divenis Silentulo.

— Ĝuste li, princo-cezaro Teodoro Jurijeviĉ...

— Ĉu koruptaĵojn li prenas?

— Neniam.

— Ĉu la petskribon al la caro li liveros?

— Kiel li deziros. Se li kredos — liveros, ne kredos — vin mem pendumos. La Siro pro lia honesteco en ĉio al li kredas. Eble, iam malfavoras, sed poste pardonas...

— Do... Ni nur eniru... — prononcis Silentulo.

Pafnutjiĉ eksvingis la malfortajn maljunulajn manojn:

— Ho, karulo, eĉ ne pensu, patro! Pereigos li la homojn, kaj fino, li estas feroca besto, torturanto, kiom da sango li verŝis...

— Atendu, avo, ne bruu vane! — ordonis Silentulo kaj, turniĝinte al la kancelariano, komencis demandi, kiel eblas trafi antaŭ la okulojn de ĉi princo-cezaro.

La kancelariano diris, ke ne ekzistas tia seruro, kiun ora ŝlosilo ne malfermus. La cezaro mem estas honesta, sed ĉirkaŭ li diversaj homoj sin nutras, aliron trovi eblas. Teodoro Jurijeviĉ estas pia: se ŝajnigi sin pilgrimo kaj doni al ĉi besto iajn de sanktaj lokoj donacojn, eble li elaŭskultos la aferon...

— Ne iru, Stefanoviĉ, por nenio! — kriis de sur la benko Teodozo. — La petskribon li ŝiros, tretos, — kion ni tiam

faros?

— Kaj mi, Teodoĉjo, sen la petskribo. La petskribo ĉe vi restos.

— Sed ne eliros vi de li viva! Li ekzekutos!

— Ĉu min? — kun malbonkora subrido diris Silentulo. — Ne, fratoj! Ne naskiĝis ankoraŭ tiu homo, kies sorto estas fini min. Mi estas sorĉita...

Kaj li komencis dekalkuli al la kancelariano oron, necesan por subaĉeto de homoj, kiuj gardas la princon-cezaron kontraŭ petantoj.

2. Sen ordo, sen tempo...

Vekiĝinte ĉe mateniĝo kaj sentante sin ne satdorminta kaj laca post la longa vojo el Pskovo, Petro ordonis voki la barbiron kaj sendis por Romodanovskij. Apude, en la najbara ĉambro, malgraŭ la frua horo, jam amasiĝis homoj, malklara zumado de voĉoj atingis la caran dormoĉambron, kie la barbiro, akrigante la razilon je la rozkolora polmo, per egalaj movoj estis ĝispure razanta la rondajn vangojn kaj la mentonon kun kaveto.

— Pli, pli pure! — ordonis Petro. — Jen, apud la orelo vi lasis. Kaj ne malrapidu, kiel maljunulino, mankas nun libera tempo...

— Kio koncernas la nerazitan flokon apud la orelo, — en la germana respondis la barbiro, — do via sanktoleita moŝto ne ĝenu vin per maltrankvilo. Tiu loko ĉe vi estas iom iritita kaj estos razita per nur unusola tuŝo de mia razilo antaŭ la fino mem de la proceduro. Kaj kio koncernas la vortojn de via

sanktoleita moŝto pri tio, ke mi malrapidas, kiel maljunulino, do kion fari? Mi estas ne juna, Siro, mi estas en tiu aĝo, kiam mi havas nenion por fieri antaŭ la malforta sekso, sed razi Siron estas grandega respondeco, kaj, certe, mi ne povas permesi al mi hasti, per kio ajn al mi minacu malrapidemo. Kaj, fine, via lasta rimarko pri manko de libera tempo. Sed ĉu vi ĝin havis iam, ĉi liberan tempon, Siro?

— Vi babilas kaj babilas! — diris Petro. — Nu kial vi babilas? Iru for, al mi tedis. Ne bezonas mi viajn kompresojn, iru, iru...

La servosoldato donis al li kaftanon, li strikte zonis sin, ordonis:

— Voku, kiu tie la unua venis. Kaj manĝon ordonu doni ĉi tien, malsatiĝis mi dum la vojo...

Eniris Jaguĵinskij[119], riverencis:

— Bonan...

— Al vi mem tian bonon! — bruske respondis Petro. — Diabloj, sentaŭguloj. Ne vin mi vokis. Kiu tie atendas...

Jaguĵinskij, ofendiĝinte, kunpremis la lipojn:

— Mi, Siro, pro aferoj senprokrastaj sidas ekde la nokto.

— Nu?

— Iuj pastroj monaĥejaj tre multaj skribas al via cara moŝto...

— Kaj en Pskovon ili skribis! — ne eksidante kaj rigardante

---

119 Paŭlo Ivanoviĉ Jaguĵinskij (1683–1736) — rusa ŝtata aganto, diplomato, kunaganto de Petro I, la unua en la rusia historio ĝenerala prokuroro (1722–1726, 1730–1735).

al Jaguĵinskij per siaj konveksaj, mokaj okuloj, diris Petro. — Ne eblas spiri pro ili. Se iuj ankoraŭ skribos — minacu per bastonbatado. Kaj ripetu al ili, diabloj, ke servistojn en monaĥejoj kaj laborantojn ili lasu nur en la plej malgranda kvanto, kie estos superfluaj — ni punos. Ankoraŭ skribu, ke monaĥejoj neniujn terenojn nek vilaĝojn arogu aĉeti sub granda minaco. Kaj la Novgorodan prioron ordonu jam hodiaŭ en mia nomo degradi al monaĥo...

Jaguĵinskij rapide skribis sur ardeztabulo.

— Mi al li jam antaŭ longe ordonis — ĉiujn muelilojn, transpasejojn, pontojn, neuzatajn terpecojn, fiŝejojn doni sub tributo al dezirantoj, hieraŭ komerciston Novgorodan en la vojo mi renkontis — ne donas oni, li diras, sub tributo. Sed ni tributajn enspezojn nun ekstreme bezonas. Kaj ĉi prioron senigi je rango. Post plugilo li iru, teron skrapu...

La servosoldato alportis nefinrostitan pro hasto kokinon. Petro starante disŝiris ĝin, komencis ronĝi per la firmaj dentoj, kriis:

— Kaj pano kie estas, Snegirjov?

Kaj, ne kolerante, bonanime grumblis:

— Ĉiuj tute la kapojn perdis, en la cara palaco eĉ manĝi bone ne eblas.

— Ne kutimiĝis ili, Siro, — diris Jaguĵinskij. — Kie oni vidis tion: ne en manĝohalo, sen ajna ordo, sen tempo...

Kondukata sub la brakoj de du preobraĵenskanoj, eniris Romodanovskij, ĝistere riverencis, anhelante eksidis sur la benkon. Petro, kvazaŭ ne rimarkante lin, ankoraŭ dum pli ol horo aŭskultis Jaguĵinskij-on, diktadis ukazojn, jen pri elfarado

de ĉapeloj el kastora lanugo kaj pri tio, ke ĉi lanugon oni ne plu veturigu trans la maron, jen pri sendo al Moskvo el Siberiaj urboj de vivaj zibeloj kaj de magneta ŝtono, jen pri tio, ke necesas brullignon segi, sed ne haki per hakilo. Post Jaguĵinskij estis ordonite voki iun fremdlandan mariston kaj navigiston kun familinomo Botsis, venintan por servi en Rusio. Pri Botsis Romodanovskij diris kun suspiro:

— Ĉi mariston mi fidas, Petro Aleksejeviĉ, ne tutkore. Li venis al ni sen ajnaj kontraktoj, monon tute ne postulis, pri via cara soldo ne interesiĝis. Por kio do ni al li necesas?

Petro strabis al la princo-cezaro, konsilis per malbonkora voĉo:

— Kaj vi lin, Teodoro Jurijeviĉ, torturu iomete! Ĉu?

Kaj minacis:

— Nu, atendu, besto! Mi parolos hodiaŭ! Vi en Arĥangelsko...

La pordo malfermiĝis, per firmaj paŝoj, ne riverencante, glate portante sian komenciĝantan dikiĝi korpon, eniris komodoro Botsis kun tradukisto el la Ambasada kancelario. Alirinte al Petro, li ĵetis al li rapidan kaj severan rigardon kaj nur tiam riverencis. Sur li estis mallonga uniforma kaftano, brodita arĝente, sub la kaftano estis kamizolo el maldika bovledo, ĉe la kokso estis Toleda malnova spado sen portepeo, en ringo.

— Botsis? — demandis Petro. Li ĉiam ĝeniĝadis, komencante konversacion, ĝeniĝis ankaŭ nun, sed por nelonge. Abrupte movinte la vangon, li ordonis al la tradukisto ekscii, kio venigis sinjoron komodoron en Rusion.

Botsis atente elaŭskultis la tradukiston, pensis, ekparolis nehaste, per malalta, trankvila voĉo. La tradukisto balancis la kapon:

— Komodoro Botsis aŭdis en fora Dalmatio pri tio, ke ĉi tie komenciĝis konstruado de floto. Lin altiris penso esti utila ĉe komenco de granda afero, kiam ankoraŭ...

Li komencis serĉi vortojn, Petro helpis:

— Mi komprenas la germanan.

— Kiam ankoraŭ ne estas faritaj nekorekteblaj agoj...

— Stultaĵoj — li diris, sed ne agoj! — ridetis Petro. — Poste, li volis diri, al nenio eblos helpi, sed en la komenco eblas komenci bone. Ĉu tiel? Do, la komodoro rezonis prave. Kie sinjoro Botsis servis antaŭe?

— En la Venecia floto. Komandis galerojn.

Petro enpensiĝis. Lia akra rigardo falis sur la manon de Botsis, sur nigran, fermitan, senornaman fingroringon. Li demandis:

— Por kio estas tio?

Botsis rigardis al sia fingroringo, respondis nehaste:

— Ĉi ringo, via sanktoleita moŝto, signifas eternan por mi funebron.

— Pri kiu?

— Tio havas signifon nur por mi sola.

La caro abrupte movis la vangon, — tiel al li respondadis malmultaj. Sed Botsis rigardis sen ajna aroganteco, lia rigardo estis honesta, malfermita. Petro Aleksejeviĉ ree vokis

Jaguĵinskij-on — ordonis skribi ukazon pri destino de komodoro Botsis al konstruado de galera floto. Kiam la dalmato ekiris al la pordo, Petro vokis lin, miris:

— Kial do vi pri la cara soldo ne demandas?

— Mi venis ne por jaro, ne por du, — respondis Botsis. — Mi venis, via sanktoleita moŝto, por eterna servo. Mi servos — poste ni vidos...

Kaj, riverencinte, li foriris kun sia tradukisto, kaj Petro fermis post li la pordon per riglilo, eksidis sur la benkon, turniĝis al Romodanovskij. Tiu sidis senmove, kvazaŭ ŝtipo, suĉis lipharojn, viŝadis ŝviton per silka, brodita per folioj kaj vinberujoj poŝtuko.

— Kion vi tie, hundo, faris? — demandis Petro. — Por kio vi heroojn en malliberejan kavon enfosis?

La princo-cezaro elblovis la lipharojn el la buŝo, kun peno turnis la senkolan kapon, respondis per glata alta voĉo:

— Por kio? Ja por tio, Petro Aleksejeviĉ, ke ĉi herooj estas tute ne herooj, sed malicaj por vi malamikoj. Kiuj ankaŭ ĝis nun estas torturataj — la latronoj de Azovo, — ili por tiuj latronoj pafistaj estas la unuaj amikoj. Herooj! Kapitano Krikov estis por la Arĥangelskaj pafistoj la gvidanto, ili ribeligajn foliojn legadis, insultajn vortojn pri via cara persono diradis, ili...

— Ja tio estas iu Krikov! — kriis Petro. — Sed Ievlev-on kial vi aligis?

— Sed vi atendu, patro, ne kriu! — per sia certa, mallaŭta voĉo interrompis la caron la princo-cezaro. — Krii ne estas aferon fari, kaj mi estis jam timigita, ne ektimos. Kiam vi en la

pasintaj jaroj el trans la maro venis, kiu estis kulpa pri la pafista ribelo? Ĉu ne mi? Kaj mi konfesis, diris: haku mian kapon per la cara mano, prenu la toporon, mi kulpas, Siro. Vi min al la lipoj kisis...

Romodanovskij per la fingro demetis larmon de la okulo, silentis iom. Silentis ankaŭ Petro, ĵetante strabajn rigardojn al la princo-cezaro.

— La pafistoj ree kapojn siajn serpentajn levas, ree siblas, per siaj langoj celas. Por kio, Siro? Por, seniginte vin je la vivo, Rusujon turni al la revena vojo. Nu, la Moskva ribelo estis antaŭ longe, ni firme pro ĝi homojn batis, sed la Azovo? La Azovo ja ne estas finita! De la Azovo fadenoj — maldikaj, sed estas, tra la tuta patrino-Rusujo kuras. Kaj ankoraŭ komploto pafista malkovriĝis sub regado de via fidela servanto — princo Prozorovskij. La urbo estas riĉa, da fremda popolo estas multe, svedaj militistoj venis, por ĉi afero eblas kuiri fortan kaĉon, kaj kiam ĉi kaĉo prepariĝos — estos malfrue. Ĝi Moskvon atingos. Ĉu vere mi diras, Petro Aleksejeviĉ?

Petro silentis, penante bruligi sian pipon. La tabako estis humida, la tindro bruletis malbone.

— La afero estas malklara, amara, terura, Siro! — ree ekparolis Romodanovskij. — Kaj ĉu vi pensas, ke por mi estas ĝojo vin per ĉi sciigoj malgajigi? Mi preferus kviete la restaĵon de la vivo pasigi kaj por vi ĝojon post ĝojo aldonadi, sed ne aflikti vin per ĉi amaraj sciigoj. Mi, Siro, serioze kun tuta atento la venintan de Arĥangelsko bravan vian servanton leŭtenanton Meĥonoŝin-on elaŭskultis, mi ne unu kaj ne du fojojn kun li konversaciis, ĉiujn detalojn esploris, mi foliojn legis kelkajn kaj flanke pri vojevodo princo Prozorovskij

eksciis. Fidela li estas al vi, kiel ankaŭ en Azovo estis fidela, kiel ankaŭ forpasinta Lefort estis al vi fidela. Kaj li bone faris, ke ĉi insidantojn li en malliberejon metis...

La pipo finfine ekbrulis, Petro tuta kovriĝis per fumo, silentis. Romodanovskij plu parolis per sia alta, glata voĉo, rakontadis pri la komploto en Arĥangelsko, pri ribelintaj sur insulo kampuloj, pri tio, kiel estis murdita fidela cara servanto — dumaano Larionov, pri tio, kiel foriris la kampuloj rabi en forajn arbarojn, kiel tiujn kampulojn almetis al la laboro siatempe Silveĉjo Ievlev — latrono kaj ŝtatkrimulo. Oni kvazaŭ aŭdis, ke tiuj arbaraj rabistoj, ekscesante sur vojoj, murdis la caran oficiron sinjoron Remezov-on, ke...

— Pri Remezov vi mensogas! — interrompis Petro. — Remezov-on ne ili murdis, sed la nevo de princo Ĉerkasskij, kiun vi neniel povas kapti...

— Ili! — obstine ripetis Romodanovskij. — Ili eĉ Moskvon atingos, de ili ĉion eblas atendi. Ili fidelajn al vi homojn — bojarojn, kaj princojn, kaj vojevodojn ĉiujn ekstermos...

— Ja bojaroj kaj princoj — kiun trovi pli fidelan! — kriis Petro. — Ekzemple Ĥovanskij-oj kaj Miloslavskij-oj[120]. Mi ja memoras...

Princo-cezaro silentis, suspiris.

— Mi ne kredus pri Ievlev, se ne Prozorovskij! — diris Petro. — Sed tamen, ke Aleksio Petroviĉ estas fidela homo, tio estas vero. Se la Azovaj malnobluloj kaj servutuloj en Arĥangelsko leviĝus — Silvestro la unua kontraŭ ili irus, vere...

---

120 Gvidantoj de la pafista ribelo de 1682. *(trad.)*

Romodanovskij silentis; per brilantaj, ŝvelaj okuletoj li rigardis al Petro, aŭskultis, kiel tiu, abrupte movante la vangon, laŭte jen asertas senkulpecon de Ievlev, jen subite dubas, rememorante iujn malnovajn vortojn, diritajn de Silvestro Petroviĉ ĉu sur la Perejaslavla lago, ĉu en Preobraĵenskoje... Li aŭskultadis kaj jesadis al la caro:

— Tiel, tiel, Petro Aleksejeviĉ, tiel, karega, tiel, suno mia. Ne simpla estas tiu afero, ne, ne simpla. Kaj nun la tempoj estas malfacilaj, vi mem diras — antaŭ grandaj aferoj ni staras, multon ni atendas, kun ne elsarkitaj radikoj pafistaj — kiel tiujn aferojn fari? Se malordo komenciĝis, turniĝo fariĝis...

— Sed Silvestro ja! — ree suferante kaj ne kredante kriis Petro. — Silvestro! Al mi antaŭ nelonge Menŝikov diris kaj Golovin — ambaŭ samvoĉe, ke iu ajn povus, sed ne Ievlev... Jen kio, vi, Teodoro Jurijeviĉ, sendu al Arĥangelsko iun homon pli inteligentan. Li mem pridemandu — kun saĝo. Aŭ, eble, ĉi tien lin alveturigi? Ĉi tie paroli?

— Sed por kio ĉi tien, Petro Aleksejeviĉ? Tie estas homoj, tie ili scias pli bone. Kaj pri la homo, do kio, pri la homo ni pensos. Ĝis oni ilin ĉiujn kaptos, ne tuj tio fariĝos. Ja la ribelo estis preparata. Terura afero. Ja la dumaanon...

Petro svingis la manojn, dentomontris:

— Mi aŭdis, scias. Nu, iru, laboru, iru. Iel vi tute bestosimila iĝis, princo! Ĉu vinon vi multe drinkas? La muzelo ŝvelis, tuta estas blua...

Kun peno leviĝinte, la princo-cezaro respondis humile:

— Vinon mi eĉ ne vidas. Laboroj estas multaj, Petro Aleksejeviĉ, kaj ĉe tiuj laboroj mi estas sola. Ĉiuj aliaj aŭ

tempon ne havas, aŭ estas tro kompatemaj. Sed mi...

Li ree viŝis larmon, aliris por kisi la manon. Petro la manon retiris:

— Nu-nu, iru, iru.

Kaj, silentinte iom, aldonis:

— Nur unu bona afero en vi estas — ne monavida. La unusola. Ne monavida kaj ŝajne fidela. Ŝajne...

Kiam la princo-cezaro estis jam en la pordo, li demandis:

— Atanazio kion skribas? Li ja scias! Sen li ne eblas, ĉu vi aŭdas?

— Mi aŭdas, Siro! — kun peno riverencante, respondis Romodanovskij. — Kiel mi povas ne aŭdi!

Petro vokis la servosoldaton, kolere ordonis jungi la kariolon.

3. Besto

Al la plenpotenca cara proksimulo Silentulo trafis en la tria tago post la konversacio kun la kancelariano kaj en la korto renkontis MeĤonoŝin-on, kiu per rapidaj paŝoj estis iranta al barilpordeto. La leŭtenanto estis ion fajfetanta kaj estis en tia bona humoro, ke eĉ ne rimarkis la grizbarban kampulon, alpremiĝintan al alta palisbarilo.

«Malbone, — pensis Silentulo, — tute malbone!»

Tamen li ne foriris, sed restis atendi kaj traatendis de la tagmezo ĝis krepusko. Antaŭ la vespero mem vigla junulo eliris al li apud la akcesora perono kaj demandis:

— Por kio la princo necesas?

— Tion, frato, mi al li mem rakontos.

— Jen kiel...

— Ja tiel.

— Kaj se tiel, do iru, malnoblulo, for de la korto, kaj al Dio preĝu, ke revenis viva el ĉi tie.

Silentulo afliktiĝis, ke malsukcesas tiom kara afero, kaj, penante paroli pli miele, rakontis:

— Eksciinte pri granda pieco de la princo-cezaro, dezirus mi, sklavo malinda, al ĉi Teodoro Jurijeviĉ en liajn proprajn manojn donaci hazarde trafintan al mi kandelon Carurban[121], fiolon da sablo de rivero Jordano, kaj ankoraŭ spliton de la Abrahama kverko...

La junulo klakis per la lango, balanciĝis de la kalkanumo sur la piedpinton kaj ordonis sekvi lin. Silentulo ekiris, memorfiksante, por ajna okazo, la vojon. Unue la junulo leviĝis sur galerion, poste ekpaŝis laŭ ŝtuparo malsupren. En malhelo ili trairis multajn silentajn ĉambrojn, kie antaŭ ikonoj flagris lucernoj; poste ili eniris en malaltan, blindan vestiblon kun volba plafono. Fenestroj ĉi tie estis ŝirmitaj per dornaj feraj rustaj kradoj, en la muroj Silentulo rimarkis ferajn ringojn kun ĉenoj, la benkoj estis priskrapitaj, kaj odoris, kvazaŭ en sovaĝa arbaro, je besto. Malklara lumo estis apenaŭ rampanta en la malgrandajn glimajn vazistasojn, baldaŭ ankaŭ ĝi estingiĝis, la vespero finbrulis. Estis sufoke, tre sensone kaj iom horore.

— Kiam la princa ĉefservisto eniros — tiam al li vi donos viajn donacojn, — kun stranga subrido diris la junulo. — Li

121 Carurbo — antikva rusa nomo de Konstantinopolo *(trad.)*

vin pro tio eĉ per brando regalos, vi ne ĝeniĝu, drinku...

— Mi preferus al la princo mem en la manojn...

— Ne nia volo. La ĉefservisto, eble, faros. Atendu...

Silentulo eksidis sur benkon, ankoraŭ ĉirkaŭrigardis. Antaŭ negranda ikonostazo, antaŭ malnove pentritaj ikonoj milde lumis lucerno. En anguloj de la vestiblo en kandelingoj kraketadis novaj, evidente ĵus ekbruligitaj kandeloj.

Kun peza ŝmaca humida sono malfermiĝis subite malalta, ferita pordo. Silentulo fiksrigardis, tremeris, ekstaris, alpremiĝis al la muro. Anstataŭ la princo, kiun li atendis, en krepusko, flarante, tenante la grandegan, grandfruntan kapon klinita iomete flanken, briletante per saĝaj kaj malfidemaj etaj okuloj, el profunda truo estis eliranta bruna, en feltiĝinta lano, maljuna, granda kaj forta urso.

Obtuze grumblante, ĵetante sian altan postaĵon, ĝi tute eniris en la vestiblon, enspiris la aeron kaj ekfiksrigardis al la homo. Post la dorso de Silentulo, el trans la dorna fero oni vokis la urson. Lamante kaj fiksflarante, per molaj anasaj paŝoj ĝi ekiris al la voko kaj, ekstarinte sur la malantaŭaj piedoj, prenis pleton, sur kiu estis stofo da brando, kaliko kaj bulko.

— Vi lin pridonacu! — aŭdiĝis el trans la fera krado trankvila moka voĉo. — Li akceptos!

Silentulo pensis dum momento, respondis kun ruzeco:

— La konsekritan kandelon Carurban, la sablon de rivero Jordano, la spliton de la kverko Abrahama ĉi besto ricevos de mi, kiam mi mortos. Ĉi sakrilegion vi, sklavoj de la piega princo, sen lia scio faras, kaj vi respondos pro tio antaŭ Teodoro Jurijeviĉ, same kiel antaŭ la caro-patro...

El trans la krado oni mallonge fajfis, la urso, ŝanceliĝante kaj flarante, ekiris al Silentulo. Silentulo ne retiriĝis, sed pli firme apogis sin per la dorso al la muro, elprenis tranĉilon, kiun li ĉiam kunhavis, kaj, tenante ĝin sur la alto de la brusto per la pinto antaŭen, prepariĝis atendi tiun lastan momenton, kiam necesos bati — trafe kaj nur unu fojon, ĉar longe batali kontraŭ tia matura besto estas nepenseble.

— Forprenu la tranĉilon! — aŭdiĝis la sama trankvila moka voĉo.

— Forigu la beston! — respondis Silentulo.

La urso aliris kaj ankoraŭ flaris, poste subite ridinte riverencis.

— Trinku la kalikon! — diris oni el trans la krado.

— Je kies sano?

— Je la sano de princo-cezaro bojaro Romodanovskij.

— Do mi trinkos!

Tenante plu la tranĉilon en la dekstra mano, Silentulo verŝis per la maldekstra el la stofa botelo en la kalikon ĝis la rando, eltrinkis per grandaj glutoj kaj almanĝis per la bulko. La brando estis simpla, kun granda kvanto de pipro. Almanĝinte, Silentulo rapide ĉifis la bulkon, subite neatendite ŝovis en la malfermitan varmege spirantan faŭkon de la urso. La besto komencis maĉi, sed la bulko algluiĝis al la palato, kaj la urso ekŝmacis. Ĝi estis tiel proksima de Silentulo, ke tiu vidis pajlajn tigojn en ĝia feltiĝinta lano sur la brusto kaj sentis odoron de sanga viando, kiu estis eliranta el la roz-blua faŭko de la besto...

— Donu do al li tion, kion vi alportis por la princo! — ordonis la trankvila voĉo el trans la krado.

— Mi ne donos!

— Tiam li mem, kara, prenos, sed kun via vivo!

Kaj strida fajfo — akuta kaj mallonga — subite aŭdiĝis en la malalta, sufoka vestiblo. Silentulo tuj kaptis de la pleto la kalikon, en kiu estis nefintrinkita pipra brando, verŝis tiun brandon en la sangajn okulojn de la urso kaj, ĝisatendinte, kiam la besto, ronkante kaj etendiĝante supren, levis super li sian fortegan ungohavan manegon, batis svinge per la tranĉilo en la brunan lanan bruston, turnis la klingon kaj, sentante sur sia vizaĝo varmegan sangon, desaltis flanken — rigardi, kiel kankroiras, rorante kaj raŭkante antaŭ la morto, tio, kiu estis destinita por lia murdo.

La urso falegis, batiĝinte per la grandega kapo al la benko, konvulsio trairis ĝian korpegon, fluo de malhela sango verŝiĝis sur la plankon, kaj kun kompatinda ĝemo la besto kadavriĝis. En la vestiblo ree estiĝis silento. Silentulo viŝis la manojn, prenis el la sino la pakon kun la donaco, suspiris.

Ne tuj malfermiĝis la dorna krado. Snufante, metante grizan hartufon sur la orelon, eliris dika, korpulenta bojaro, batis per la piedpinto la mortintan urson, demandis abrupte:

— Por kio vi mian urson mortigis, sklavo? Ĉu min vi per la tranĉilo celis? Oni venadas, portas donacojn, ni scias, — parolis li, el sub la frunto fiksrigardante Silentulon, — kaj ĉiu havas aŭ tranĉilon, aŭ maŝon, aŭ venenon...

La grizaj lipharoj pendis super liaj ruĝaj, malsekaj lipoj, la okuloj rigardis malbrile, malklare, la dikvanga vizaĝo estis

kovrita de ŝvito. Kaj el pordoj unu post alia aperadis helpantoj — fortikaj viroj el la princa servistaro...

— La urson mortigis, kun tranĉilo venis, por kio tiel?

Kun angoro aŭskultis liajn malbrilajn vortojn Silentulo. Por kio venis li ĉi tien? Li venis, por plendi pri teruraj maljustaĵoj kaj subpremado de Prozorovskij, por diri vorton por Rjabov kaj Ievlev, venis por la vero kaj justo — kaj jen oni ĉasas lin per urso, kaj se li mortigis la urson, tiam respondos pro tio per sia vivo! Jen al vi justo!

— Parolu!

Silentulo ankaŭ nun nenion diris — nur ekrigardis al la princo-cezaro. Tiu abrupte tiris la ŝultrojn, forturniĝis. Kaj tuj kontraŭ lin ekiris la servistoj de Romodanovskij. Li povis ankoraŭ defendi sin, la tranĉilo estis en lia mano, sed tia terura, tia amara angoro kunpremis lian koron, ke li tute moliĝis, sidiĝis sur la benkon kaj lasis ligi sin per rimenoj...

En la kvieta korto, sub grandaj, malvarmaj steloj, oni batis lin. Li ne sentis. Poste oni ĵetis lin en ian kelon, poste sur ĉaro, nokte, ekveturigis ien malproksimen, probable por morto. Sed en strateto trans forbrulintaj domoj la ĉaro subite haltis, al li oni donis trinki, levis, surmetis popan sutanon. Stumblante, malbone komprenante, li ekiris post maljunulino, kiu klarigadis al noktaj gardantoj, ke ŝi kondukas ne rabiston, sed pastron — konfespreni mortanton. La gardantoj ridadis:

— Jen kia bona popo! Evidente, de bona regalo vi lin kondukas...

La maljunulino kraĉadis, plendadis, ke sobran popon en ĉi tempo trovi neniel eblas.

Ĉe mateniĝo, ĉe kokokrioj, en la horo, kiam kun grinco kaj knaro malfermiĝas la feraj klapoj de la pordego de Sankta Floro en Kremlo, la maljunulino kondukis Silentulon en la korton de forpasinta Poluektov. Ĉi tie oni atendis lin kun manĝo, kun vodko, kun hejtita banejo. Teodozo, rigardante al la amiko, viŝante subite verŝiĝintajn el la okuloj abundajn, etajn larmojn, diris:

— Jen, Stefanoviĉ... Mi diris ja... Sed vi neniam aŭskultas...

Silentulo ne respondis, rigardis antaŭ sin per angora rigardo. La kancelariano ĝojis, fanfaronis per sia lerto kaj ruzeco, ke li de Romodanovskij mem el la manegoj lin eltiris. Silentulo diris al Teodozo:

— Malbona estas nia afero: Meĥonoŝin-on mem — la fian leŭtenanton mi tie vidis, li iris gaja. Ja li ĉi tie konsilos...

Pafnutjiĉ ĝemis:

— Ĉio sen rezulto. La oron vi preskaŭ finis, — ho, Dio, kiom multe da mono, sed por kio...

Post la bano ili faris konsiliĝon kaj decidis laŭ konsilo de la kancelariano iri al Voroneĵo: tie estas Apraksin, li, eble, akceptos la petskribon, kaj se akceptos, tiam estos tiu petksribo en la manoj de Petro Aleksejeviĉ.

— Ĉu estos? — kun morna kolero demandis Silentulo.

— Do tiam por kio iri? — kriis Teodozo. — Prefere ĉi tie mortaĉi...

— Nu, do ni iru! Nur ne havas mi nun tranĉilon, kaj sen tranĉilo iri por justo estas timinde...

Pafnutjiĉ aĉetis kontraŭ negranda prezo bonan mallongan

ponardon, Paŭlo Stefanoviĉ dum duono de tago akrigadis ĝin sur ŝtono en ŝedo. Ankoraŭ post unu tago la kancelariano, por ke ne interkaptu Silentulon kun Teodozo sur la vojo gardantoj, faris al ili folion kun subskribo kaj kun pendanta nigra vaksosigelo. En la folio estis skribite, ke ili estas komercistoj de la Drapa cento, veturas al Voroneĵo pro sia komerca kaj negoca neceso.

— Kio estas negoca? — demandis Teodozo.

— Ja kiu ĝin scias! — respondis la kancelariano. — Estas ordonite tiel skribi, kaj ni skribas. Negoca — signifas negoca...

Teodozo prenis el la manoj de la kancelariano la paperon, rigardis tra ĝi al lumo, balancis la kapon:

— Ruza laboraĵo! Ĉu vi mem faris?

— Ja kiu alia?

— Vi bone penis. Pro komerca kaj negoca. Jen...

La kancelariano drinkis pro siaj penoj glaseton da vodko, almanĝis brasikon, diris, ke devus la vojaĝantoj vesti sin, alie eĉ kun ajna «negoco» oni ilin kaptos. Pafnutjiĉ, pensinte, diris, ke en la domo de Poluektov restis iuj vestaĵoj, la forpasinto, verŝajne, neniom malaprobos, se li tiujn vestaĵojn donos por la dioplaĉa afero al Forĝisto kaj Silentulo. Iel-tiel, ĉio ĉi estas por utilo de Silvestro Petroviĉ...

— En propra ĉareto veturi necesas! — renversinte ankoraŭ glaseton, konsilis la kancelariano. — Eblas aĉeti nemultekoste. Kaj perpiede kun ĉi papero ne taŭgas.

Silentulo kaj Teodozo interrigardis: da mono restis tute malmulte.

— Li prave diras! — diris la avo. — Dum vi perpiede iros, Teodoro Matejevi̯ĉ forveturos. Nun ja oni longe sur unu loko ne sidas... Por kiu estos bone, se vi lin ne atingos?

En la sama vespero la voja̯ĝantoj elmarĉandis paron da falvaj ĉevaloj, belan ĉareton, sub kovrilon metis fojnon kaj, vestinte sin en malnovaj, bondrapaj kaftanoj de la forpasinta bojardumaano, ĉe malvarmeta matenru̯ĝo elveturis el la pordego de la korto de Poluektov. Pafnutji̯ĉ, plorsingultante kaj kuntiriĝante en matena malvarmo, riverencis post la ĉareto kaj diris al la kancelariano, kiu estis almanĝanta la adiaŭan glaseton per bulko:

— Ho, kancelariano, kiom ankoraŭ da malfeliĉo ili travivos, kiom da suferoj. Kaj ĉu ĝisveturos Teodoĉjo Voroneĵon? Malforta lin nun estas, malsana...

— Tio estas vero...

— Ne ĝisvivos li la aferon!

— Estas vero, ke ne ĝisvivos. Nu, tamen Silentulo ĝisvivos. Tiun nenia forto rompos. Unuvorte — viro nefleksebla...

4. Ĵuro

Ili veturis laŭ granda vojo al Serpuĥovo -Tulo, Jeleco — Voroneĵo, hastis, por trovi Apraksin-on sur la loko, dormadis malmulte, pli zorgante pri la ĉevaloj, ol pri si mem. Forĝisto estis multe pli malpacienca, ol Silentulo, urĝadis senĉese kaj ĉiam malĝojis, ke ili ne sukcesas...

En mateniĝoj jam estadis fortaj aŭtunaj matenaj frostoj, voja koto kraketadis sub la feritaj radoj de la ĉareto, sed poste pro

sunaj radioj iĝadis varme. Silentulo, pririgardante kvietajn aŭtunajn kampojn kaj holmojn, malriĉajn vilaĝojn, solecajn ĉevojajn domojn, rekonadis la gepatrajn lokojn, malgaje rakontadis al Teodozo pri la antaŭ longe pasintaj jaroj, pri tio, kiel vivis li ĉi tie sian teruran mizeran vivon de servutulo, kiel oni batis lin per bastonoj sur la korto de bojaro Zubov, kiel, levinte tranĉilon kontraŭ sia princo, li foriris en arbarojn kaj en vintra tempo vivis tie, kiel lupo...

Teodozo aŭskultadis distrite, rigardis antaŭ si al la vojo per febraj okuloj, por longe enpensiĝadis kaj, kiam Silentulo vokadis lin, kvazaŭ timiĝadis, tremeradis. De tempo al tempo li ĉiam fartis pli malbone. Li por longe ne povis enspiri, kaj tiam lia griza, konsumita de la malsano vizaĝo bluiĝadis, la fingroj tordiĝadis, li faladis en la ĉareton aŭ petadis halti kaj kuŝadis sur malvarma humida tero. El lia brusto eliĝadis raŭkoj kaj stertoroj intermite kun insultoj al si mem. Kaj Silentulo staradis super Teodozo, larĝe dismetinte la piedojn, rigardadis al li per malhela trista rigardo kaj konsoladis mallerte:

— Vi atendu... De Voroneĵo mi kun vi al Nigra Krutaĵo[122] iros, al Volgo-patrino. Tie niaj viroj atendas, ni ripozos iomete. Kaj el tie al Astraĥano. Mi tie kaj amikojn havas, kaj domon ni trovos. Vi varmiĝos, ĉu vi aŭdas, Teodozo... Atendu!

Nemalproksime de Jeleco Silentulo ne eltenis, petis turni la ĉareton de la granda vojo flanken. Per obtuza pro emocio voĉo li klarigis:

— Vilaĝeto tie estas — Kortoj. Mi nur duonokule rigardos,

122 Nigra Krutaĵo (Чёрный Яр) — vilaĝo (iam urbeto) kun fortreso apud Astraĥano; dum la ribelo de Razin la fortreso estis kaptita de la ribelantoj en 1670–1671 *(trad.)*.

kaj ni veturos pluen. Eble, vivas ankoraŭ la patrino kaj la patro, la fratino, la frato...

Teodozo respondis kun timo:

— Gardu vin, ne kaptiĝu. Se ekscios iu...

— Mi iros malfrue, nokte.

— Kiu bezonas, eĉ nokte vidas...

— Tranĉilon mi kunhavas.

La ĉareton ili starigis en arbareto, la ĉevalojn maljungis, ligis al ili la krurojn, Silentulo foriris. Forĝisto kuŝis senmove, rigardis en la nigran, stelkovriĝintan ĉielon, konversaciis kun Dio, amare riproĉadis lin pro maljustaĵoj, kiuj estas sur la tero, pro homaj malfeliĉoj, pro teruraj plagoj. Sombre, kun kolero kriadis gufo, maltrankvile ronkadis la timigitaj de io ĉevaloj. Flagradis sennombraj, foraj, malvarmaj aŭtunaj steloj, — Teodozo parolis kun ili, kiel kun Dio, insultadis ilin, ke jen ili rigardas, sed nenion vidas, ĉu justo aŭ maljusto — por ili estas egale...

Ĝene daŭris la longa nokto. Nur antaŭ mateniĝo revenis Silentulo. Teodozo demandis lin, ĉu vidis li la siajn. Silentulo respondis, ke ne vidis, ne sukcesis.

— Ĉu ili estas vivaj?

— Bruligis ĉiujn bojaro Zubov jam en tiuj antaŭaj tempoj! — jungante la timonĉevalon, respondis Silentulo. — Bruligis la domon kaj miajn gepatrojn bruligis vive, kaj la fratinon, kaj la fraton...

— Ĉu vive?

— Vive!

— Ĉiujn?

— Ĉiujn tute!

— Sed pro kio?

— Pro mi, pro tio, ke mi tranĉilon levis kontraŭ la bojaro kaj de lia kolero foriris al Volgo...

Tage Forĝisto vidis, kiel malvolvis Silentulo puran ĉifonon, en kiu estis kolektita manpleno da tero, kiel li ree ligis nodon kaj kaŝis la ĉifonon ĉe la brusto. Plu Silentulo ne rememoradis kaj ne rakontadis, rigardis same, kiel Teodozo, antaŭ si al la vojo, kuntirinte la brovojn, firme kunpreminte la lipojn.

Nemalproksime de vilaĝeto Usmanjo Teodozo ordonis al Silentulo halti kaj petis sterni drelikaĵon sur holmeto apud la vojo. Silentulo kun perplekso ekrigardis al la kamarado, diris, ke en la vilaĝeto estos pli oportune ripozi.

— Ne, — severe prononcis Teodozo, — alveturis mi, amiko. Sternu — mi mortos.

Silentulo sternis. Estis serena, kvieta, varma tago. El la vilaĝeto aŭdiĝis sonorilado, Silentulo rememoris, ke hodiaŭ estas dimanĉo.

— Oni sonorigas! — per obtuza voĉo prononcis Teodozo. — Al li oni sonorigas, ke li sciu: Forĝisto iras, pri ĉio demandos... Kaj mi demandos.

Li fermis la okulojn, ripozante, poste ordonis al Silentulo elpreni el lia boto ormonerojn, kaŝitajn tie, kaj preni la monon al si. Silentulo, ne disputante, transmetis la monujon, eksidis apud Teodozo sur la drelikaĵon, glatumis lian maldikan ŝultron.

— Baldaŭ! — promesis Forĝisto.

— Kuŝu, kuŝu!

— Jam nun mi ne ekstaros kaj ne kuros! — subridis Teodozo. — Ĝisveturis mi la lokon. Kiel tie en la dokumento pri ni estas dirite...

Li longe rememoradis, poste kun gaja graveco prononcis:

— Por komerca kaj negoca neceso...

Kaj subite, levetinte sin sur la kubutoj, per alia voĉo severe ordonis:

— Per la forbrulintaj patro kaj patrino viaj, Stefanoviĉ, per la frato kaj fratino, per ĉiuj orfoj kaj vidvinoj, per ĉiuj malfeliĉoj kaj larmoj, kiujn vi scias, — ĵuru al mi nun, ke ne rezignos la aferon, kiu estis de ni komencita, fordonos la petskribon, per sango subskribitan, timos nek torturon, nek morton mem... Vi estas sola nun, al solulo estas multe pli malfacile...

Silentulo aŭskultis, rigardis en la malforte brilantajn okulojn de Forĝisto.

— Parolu! — kun maltrankvilo petis tiu.

— Mi faros ĉion kiel necesas! — firme respondis Silentulo. — Vi estu certa...

— La petskribo ja estas sur mi.

— Mi scias.

— Prenu, dum mi estas viva...

Silentulo malbutonis la kaftanon sur Teodozo, per tranĉilo tranĉis dikajn fadenojn. Teodozo, kvazaŭ trankviliĝinte, kuŝiĝis sur la dorson, ree komencis rigardi al la ĉielo kun kurantaj en

ĝi malpezaj blankaj nubetoj.

— Ĉe ni nun, eble, estas frostoj! — diris li subite.

— Kie ĉe ni?

— En la Arĥanĝela urbo.

— Probable tiel...

— Se mi nun oksikokon acidan povus manĝi...

Li humile suspiris.

— Vi enterigos min ĉi tie, apud la vojo. Ja tiel estas pli gaje: homoj veturas, iuj kantojn kantas, iuj pri siaj aferoj konversacias. Kaj sur tombejo... kuŝi kun mortintoj...

— Mi enterigos.

— Estas ĝene por vi, mi pensas, sidi kun mi. Vi en la vilaĝeton iru, rigardu, kiel tie estas, kaj mi dume sukcesos...

Sed Silentulo nenien iris, sidis ĉe Teodozo, ĝis li senkonsciiĝis antaŭ morto. Samloke, riverencinte al la mortinto kaj kisinte lian malvarmiĝantan frunton, li elfosis per prenita de preterveturanta kampulo fosilo tombon, ĉi tien alveturigis al li ĉarpentisto el la proksima vilaĝeto nefarbitan ĉerkon, ĉi tien en espero pri profito venis ankaŭ popo kun sakristiano. Antaŭ vespero, en venta krepusko, sub malaltaj grizaj nuboj Silentulo mallevis la ĉerkon en la tombon, staris ĉe la nealta holmeto, kaj iom poste en la vilaĝeto Usmanjo, en drinkejo, drinkis rememore al la ĵus forpasinta Teodozo glaseton da vodko. Por ne perdi valoran tempon, dum tuta tiu nokto li veturis sen halto...

5. En Voroneĵo

Veninte en la urbon, Silentulo dum du tagoj persiste serĉis alirojn al Apraksin kaj, malgraŭ ĉiuj penoj, ne sukcesis trovi. Ĉi-tieaj novuloj — alpelitaj de vojevodoj laŭ la cara ukazo lignosegistoj, fusilaj, kirasaj, kanonaj majstroj, pulvistoj, kalfatristoj, ĉarpentistoj kaj lignaĵistoj — nenion bone sciis, kaj se iu sciis, tiam timis diri troan vorton. Ŝipkonstruaj laborantoj al obstinaj pridemandoj de Silentulo nur neadis kaj ŝultrolevadis: de Teodoro Matejeviĉ ili eĉ la vizaĝon ne vidis, nenion pri li scias, ĉu ni, kotuloj, povas rigardi supren, pro tio, eble, oni punos.

Paŝante en la mirinda pro sia multhomeco Voroneĵo, en ĝiaj kvartaloj, en la tera, kaverna urbo, kie mizeris la laboruloj, Silentulo koleris: «Jen kia popolo! Kiom multas ili ĉi tie — eĉ per vicoj eblas meti, tamen homo ne videblas».

En angoro li eliris al la rivero, rigardis ŝipojn, konstruitajn de la alpelitaj laborantoj: ŝipoj estis multaj, ili staris linie, kvazaŭ parade. Malalta vireto kun bonkoraj infane bluaj okuletoj, kun lina barbeto, en kuspita sur la vejnecaj kruroj pantalono, kun plezuro en la voĉo parolis:

— Vidu, jen tiu — longbarko nomiĝas, de princo Ĉerkasskij konstruita. Kaj post ĝi «Tamburo» — de bojaro Ŝeremetev. Jen «Pesilo» — de tablestro Saltikov, ankoraŭ «Forto», kaj «Malfermita pordego», kaj «Floro de milito» — de princo Trojekurov...

— Ĉu de Trojekurov? — demandis Silentulo.

— De li...

— Ĉu li konstruis?

— Certe! — haste konsentis la vireto. — Lia kompanio...

— Kompanio, kompanio! — kun kolero en la voĉo mokimitis la humilan vireton Silentulo. — Lia kompanio! Kampuloj la dorsojn fleksas, kampuloj mortas, sangas, sed li — kompanio!

La vireto ekpalpebrumis konfuze, Silentulo ekiris flanken, kuntirinte la flokajn brovojn, severe rigardante antaŭ si al tedaj vicoj de terkabanoj, en kiuj loĝis la konstruantoj de la cara ŝipa floto. El sufokaj truoj sentiĝis peza, humida odoro, infana ploro, maljunula tusado, ebria insultado. Samtie en kaldronoj estis kuirata mizera manĝo, ĉi tie oni manĝadis, ripozadis, dormadis, laciĝinte de la bagna, superforta laboro. El ĉi tie oni ankaŭ fuĝadis en forajn arbarojn, en translagan nordan landon, en malproksiman varmegan stepon...

Pasante tra la urba placo, Silentulo ekvidis ekzekuton: ĉirkaŭ dek du nejunaj viroj staris, tenante sin je la apogilo de la kancelaria domo; apud ili estis lace pasumanta la ekzekutisto, movante la akrajn skapolon sub ŝvitkovrita pro laboro ĉemizo, batadis kun retiro per vergaj bastonoj al sangantaj, bluaj, ŝvelintaj suroj de la viroj. Unu — grandega, grizbarba, kun kaviĝintaj okuloj kaj ŝvita vizaĝo — rimarkiĝis al Silentulo per speciala esprimo de ia funebra kaj kolera pacienco...

— Pro kio oni ilin? — demandis Silentulo maljunulon, starantan apogiĝinte al bastono apud la preĝejo.

— Ili estas starostoj, patro. Fuĝas ilia popolo de la ŝipkonstruado, kaj nun oni ankoraŭ riveron Voroneĵon kaj Donon entreprenis purigi, por estu pli profunde por la ŝipoj. La homoj do tute ekfuĝis. Nu, kaj ili respondecas...

Du maljunulinoj kun lignaj laktositeloj alportis al la suferantoj lakton. La ekzekutisto eksidis flanke, la starostoj trinkis el la laktositelo avide, la maljunulinoj krucosignadis la martirojn, viŝadis iliajn ŝvitajn vizaĝojn.

Pli poste, vespere, en la cara drinkejo sub ŝafa kranio Silentulo aŭskultis rezoneman ŝipmajstron, venintan el fora Kolo, nehastan, kun malrapida parolo. La majstro rakontis, kiel malfacile estas konstrui ĉi tie en Voroneĵo ŝipojn. Bienuloj sendas en la kompanion maljunulojn, kaj iam knabojn de ok aŭ naŭ jaroj, nomante ilin laborantaj animoj. Maljunuloj tute ne povas labori, mortas tuj. Fremdlandanoj, same kiel en Arĥangelsko, kiam tie estis konstruataj ŝipoj, plej ofte nenion scias pri la ŝipa afero, sed nur insultas kaj skribas al sinjoro Apraksin denuncojn unu pri la alia; holandanoj ne deziras obei danon, dano grincas per la dentoj al italo, la popolo pro ĉi afero suferas tiom, ke ne eblas rakonti. Estis admiralejano Protasjev — homo kun kapo, sed nun li estas arestita kune kun vojevodo Polonskij, mensogis pri li fremdlandanoj nesciate kion...

— De tiuj bonon ne atendu! — diris Silentulo.

La ŝipmajstro, regalita per vino, finfine montris al Silentulo, kie loĝas Teodoro Matejeviĉ Apraksin. Sed tuj kiam Silentulo eniris en la barilpordeton, li ekvidis Tadeĉjon Miroŝnikov-on — la ĉefintendanton ĉe princo Zubov. Tadeĉjo estis la sama, kiel antaŭ dudek jaroj: grandmuzela kaj obeza, kun grandegaj balanciĝantaj manoj. Sur lia konscienco kuŝis pluraj dekoj da vergitaj ĝismorte servutuloj de la princo, sed Silentulo retenis sin, por ne iri al certa pereo. Preskaŭ tutan tiun nokton li ne fermis la okulojn — ĉiam konjektadis, por kiaj aferoj Miroŝnikov estis en la korto de Apraksin kaj ĉu longe li

ankoraŭ estos tie.

En la sekva tago li ree ekvidis Tadeĉjon, kaj okazis tiu renkontiĝo tiel, ke ankaŭ Miroŝnikov lin rimarkis, eĉ vokis, sed Silentulo foriris ne returniĝante, kaj la intendanto ne penis atingi lin, — decidis, probable, ke misrekonis.

Tiel venis ĵaŭdo. Matene de tiu tago skribisto de la ŝipkonstruejo konfirmis, ke Teodoro Matejeviĉ nepre forveturos morgaŭ, vendrede. Necesis decidiĝi, kaj Silentulo decidiĝis.

En krepusko li eniris en la korton de la domo, en kiu loĝis Apraksin, kaj leviĝis sur la nealtan peronon. En la vestiblo malforte lumis glima lampo, odoris je acida brasiksupo, sur ŝafaj peltjakoj, faligitaj amase, estis dormetanta deĵoranta soldato. El trans la pordo aŭdiĝis bruo, laŭtaj voĉoj de disputantoj, brava kanto.

— Kiun vi bezonas? — demandis la soldato.

— Apraksin-on Teodoron Matejeviĉ-on pro cara afero! — klare respondis Silentulo. — Ĉu li estas ĉi tie?

La soldato demetis de hoko malhelan lampon, ekrigardis al Silentulo.

— Ĉu komercisto?

— De la Drapa cento.

— Trairu!

Silentulo eniris.

Rekte kontraŭ la pordo, apogiĝante per la pugnoj al larĝa benko, retroklininte la kapon, estis ridanta pri io dika, rozkolorvanga, ĝis nun ankoraŭ buklohava bojaro Zubov.

Kelkaj kandeloj, enŝovitaj en kolojn de stofaj boteloj, estis prilumantaj lian brilantan mentonon, la orbroditan kaftanon, glasetojn, botelojn, telerojn sur la tablo, ruĝajn pro vino kaj sufokeco vizaĝojn de aliaj festenantoj.

— Je Dio, mi tro drinkos! — ridante, estis diranta Zubov. — Ne povas mi tiom drinki! Kaj la aĝo jam ne estas konvena, kaj la afero ankoraŭ ne estas farita, — la arbaro ne estas vendita...

— Vi vendos, princo!

— Vian arbaron ne eblas ne vendi!

— Drinku!

— Sufiĉas, vere, sufiĉas! — plu ridis Zubov. — Hodiaŭ jam sen tio estas multege drinkite. Kaj kien hasti — ja ne al nupto...

Silentulo staris senmove: kontraŭ tiu ĉi homo pro ties multaj maljustaĵoj levis li tranĉilon en la pasintaj jaroj. De li, de Zubov, foriris li en arbarojn. Zubov en siaj ĉasterenoj ĉassekvis lin per hundoj, kiel beston. Zubov vive forbruligis la tutan familion de Silentulo, de li, de la princo, fuĝis Silentulo al Volgo, de Volgo — al la fora libera nordo. Kaj jen hodiaŭ la sorto kunvenigis ilin — okazis renkontiĝo.

Per malrapida movo ŝovis Silentulo la manon en la sinon, kunpremis la ponardon, sed tuj rekonsciiĝis: kio ajn okazu, li devas atingi Apraksin-on, ne povas li pro sia afero pereigi la petskribon, subskribitan per sango. Necesas humiliĝi, kvietigi sian koron.

— Kiun vi bezonas? — kriis al Silentulo homo, sidanta apud Zubov.

Zubov same ĵetis rigardon al Silentulo, por momento liaj

larĝaj brovoj leviĝis, kvazaŭ li rekonis sian fuĝintan servutulon, sed al li oni alportis glason, kaj li formovis la okulojn.

«Ĉu li rekonis aŭ ne rekonis? — pensis Silentulo. — Ĉu rememoris aŭ ne rememoris?»

Kaj per solidaj paŝoj li pasis preter la brua festeno en la malproksiman ĉambron, kie en lumo de kandeloj, demetinte la kaftanon, pensante super desegnaĵo, kun cirkelo en la manoj staris Teodoro Matejeviĉ Apraksin, tamen ne tia, kia li estis antaŭ multaj jaroj en Arĥangelsko, kiam li venadis al la Solombala ŝipkonstruejo, sed alia: kun profundaj kalvaĵoj sur la alta frunto, kun sakoj sub la ruĝaj okuloj, kun mallevitaj ŝultroj.

Ne tuj li ekrigardis al Silentulo per sia laca rigardo. Kaj kiam ekrigardis, tiam kvazaŭ ne ekvidis, plu flustris por si ciferojn, kaj liaj blankaj fingroj estis ludantaj per la cirkelo.

— Kiu vi estas? — demandis li finfine. — Estis ordonite neniun enlasi ĉi tien, tutegale vi ĉiuj venas de mateno ĝis nokto. Kion vi bezonas?

— Legu, Teodoro Matejeviĉ! Kaj jam nun legu — sinjoron Ievlev-on koncernas, — insiste diris Silentulo kaj metis la petskribon sur la ŝipan desegnaĵon antaŭ Teodoro Matejeviĉ. — Legu kaj rigardu — subskribita per sango.

Apraksin ĵetis la cirkelon, eksidis, etendis la manon al pipo, sed ne atingis, — lia mano ekpendis super la tablo. Longe, malrapide, vorton post vorto li legadis kaj relegadis la rakonton pri suferoj kaj torturoj, pri eltrudoj kaj perfortoj, pri pendigilo kaj knuto, pri ĉio, kion faradis vojevodo Prozorovskij dum tiuj

jaroj, kiam li regis la Nordon. Li legis pri tio, kiel per forto kaj mensogo devigis li neobeemajn dvinanojn skribi al la caro la paperon, legis kun streĉita atento, pensis, kaj sur lia pala vizaĝo aperadis ruĝaj makuloj de kolero. Sed strange: al Silentulo subite ŝajnis, ke ne nur koleras Teodoro Matejeviĉ, sed samtempe antaŭ kontentas, kvazaŭ li atendis tian paperon kaj nun kaŝe ĝojis, ke ĝi estas en liaj manoj.

— Kiu skribis ĉi folion? — demandis li poste.

— Multaj dvinanoj.

— Ĉu ne Krikov kapitano?

— Ne Krikov! — post paŭzo respondis Silentulo.

Kaj ree al li ŝajnis, ke pri lia respondo Apraksin estas kontenta.

— Ĉu vi ĝuste scias, ke ne Krikov?

— Mi scias, ke ne li.

— Mensogas vi!

— Mensogi mi ne estis instruita!

Iliaj rigardoj renkontiĝis, ili ambaŭ eksilentis. Kaj sciante, ke li agas saĝe kaj ĝuste, Silentulo prononcis:

— Ĉi petskribo, se en la manojn de la Siro trafos, multe povas faciligi la sorton de nia kapitan-komodoro Silvestro Petroviĉ Ievlev...

— Kaj vi kiel al li rilatas? — demandis Apraksin.

— Ja tiel mi al li rilatas, ke sub li ni la svedajn militistojn en Dvino batis, li el la fortreso, ni el la insulo. Ĉu pri elŝipiĝo de la svedoj vi aŭdis? Kiel sur la insulo tiuj svedoj estis batitaj de

iuj kampuloj? Ĉu aŭdis? Jen en tiu tempo ni ekkonis Ievlev-on Silvestron Petroviĉ-on...

— Kion oni en Arĥangelsko parolas? Pro kiaj pekoj li estis ĵetita en malliberejon?

— Kaj li estis kaptita kaj Rjabovon-rudriston oni serĉas ne pro pekoj, sed pro praveco...

— Ĉu ĝuste tiel ĉiuj parolas?

— Ĉiuj, sed ĉu estas utilo? Fremdlandanoj, oni diras, pri li skribis mensogon, kvazaŭ li svedan militiston kun honoroj en la citadelo akceptis; li mem kvazaŭ estas perfidulo kaj la rudriston por perfida afero li sendis al la svedoj sur la ŝipojn...

— Ĉu estas tiaj, kiuj kredas tion?

— Tiajn mi ne konas.

Ili ree silentis. Teodoro Matejeviĉ subite demandis:

— Vi mem ja kiu estas?

— Sed tio por vi ne necesas, Teodoro Matejeviĉ! — respondis Silentulo. — Se mi diros mian nomon — estos nek malpli, nek pli bone. Preteriranta homo mi estas, kaj fino.

— Ĉu fuĝulo?

— Nu, fuĝulo!

— De kiu fuĝulo?

— Fuĝulo mi estas de sinjoro Zubov, kiu en via manĝoĉambro vinon drinkas. De li mi estas fuĝulo.

— Kaj ĉu vi vidis lin, kiam al mi iris?

— Vidis, Teodoro Matejeviĉ.

— Sed tamen iris?

— Iris.

— Eble, li vin eĉ ne memoras?

— Se li ne memoras, liaj homoj memoras.

— Por kio do vi iris?

— La petskribon mi portis. Ne miaj larmoj, ne mia sango. Mi portis — kaj ĝisportis.

— Kaj poste kio estos?

— Poste ni vidos...

Teodoro Matejeviĉ kun intereso ankoraŭ ekrigardis al Silentulo, demandis:

— Ĉu ne maristo?

— Ŝajne ne.

— Bedaŭrinde!

Li vokis homon, ordonis al li elkonduki Silentulon el la domo.

— Se en la manĝoĉambro oni haltigos ĉi negociston, diru: al li mankas tempo. Ĉu vi komprenis?

La soldato diris, ke komprenis, sed Paŭlo Stefanoviĉ vidis laŭ liaj okuloj, ke li eĉ ne supozas, pri kio temas...

La festeno en la manĝoĉambro iĝis eĉ pli gaja: du bienulidoj estis dancantaj sub korna muziko, oficiroj, lokaj nobeloj, fremdlandaj ŝipmajstroj aplaŭdis, piedfrapis, ululis. Zubov staris ĉe la pordo, trinketante medon el kaliko, sen palpebrumi rigardis al Silentulo. Paŭlo Stefanoviĉ haltis, sed la akompananta soldato neforte puŝis lian dorson, dirinte:

— Iru, iru, sinjoro komercisto, iru pli vigle...

Post la dorso de la princo en griza tabaka fumo staris senmove, kvazaŭ malvivaj, liaj homoj, servistoj en frambokoloraj strikte zonitaj kaftanoj — fortikaj, sataj. Kaj Tadeĉjo ne estis — li atendis en la korto...

— He, la komerciston tralasu! — diris la soldato post la dorso de Silentulo, — nu, rapide. Mankas tempo al sinjoro negocisto...

La princo, ĵetinte oblikvan rigardon, iom flankeniĝis, la soldato diris post Silentulo, ke jen la tuta afero, kaj tuj Paŭlo Stefanoviĉ ekvidis Miroŝnikov-on, kiu estis kankroiranta antaŭ li en la korto. De ĉiuj flankoj al li estis moviĝantaj homoj de Zubov, lunaj rebriloj saltis sur iliaj vizaĝoj, kaj la ponardo, kiun li tenis en la mano, nun ne povis helpi al li.

Li ŝoviĝis malantaŭen — kaj al la barilo, lin oni tuj atingis kaj faligis. Preskaŭ en la sama momento la princa servistaro kovris lin per drelikaĵo, por ke li iomete sufokiĝu, kaj komencis bati lin per la botoj. Poste oni ĵetis lin sur ĉaron kaj ekveturigis ĝis morgaŭ en la Voroneĵan bienon de la princo. Tie estas kaj propra malliberejo, kaj kelo kun pendigilo, kaj ekzekutisto por servutuloj...

En malfrua nokto Silentulo rekonsciiĝis, trinkis el ĉerpilo akvon, komencis pensi, kiel helpi al sia embaraso. Kaj subite rememoris — kie estas la ormoneroj de Rjabov?

La ormoneroj troviĝis en la botoj, la princa servistaro lin ne senbotigis.

Trinkinte ankoraŭ akvon kaj restariginte la spiradon, Silentulo alrampis la pordon kaj vokis la gardanton.

— Kion al vi? — demandis kruda voĉo.

— Eniru! — petis Silentulo.

— Kion vi elpensis! — diris la gardanto. — Eniri! Ruza vi estas! Ne estas ordonite al ni.

— Ĉu Serĉjo? — ruze demandis Silentulo.

— Serĉjo antaŭ longe estis anstataŭita.

— Kaj vi kiel nomiĝas? Ĉu Luĉjo? — konjektis Silentulo.

— Simĉjo mi estas...

— Ĉu el Gordejevka?

— Ne... El Partenovka...

— El Partenovka, Simĉjo! — ĝoje, flustre diris Silentulo. — Parenco, je Dio parenco! Ja vi, probable, estas baptofilo de mia avo... Aŭskultu! Mi oron havas. Multe! Liberigu min, mi fordonos...

Simĉjo subridis, estis aŭdeble, kiel li gratas sin trans la krada pordo.

— Oro?..

— Je Dio, oro! — pli laŭte, pli kuraĝe ekparolis Silentulo. — Se vi ne liberigos — tutegale la mono trafos al la princo. Sed la mono estas multa, kun ĝi vi faros kion ajn. Ĉu vi havas edzinon?

— Ne, ne havas...

— Kaj tute bone. Kun mi kozaki vi iros. Nur rigardu...

Li ŝovis tra la krado moneron, la gardanto prenis ĝin, miris:

— Kaj vere, oro...

— Pensu, Simĉjo. Kiam mateniĝos — estos malfrue...

Simĉjo pensis, diris kun suspiro:

— Mi ne sola estas. Ĉe la pordego ankoraŭ gardanto staras, sur la strato gardisto iradas. Pereos ni ĉiuj...

— Da oro estas multe! — diris Silentulo. — Vi min aŭskultu, Simono, aŭskultu kion mi diros... Ĉevalojn necesas ankoraŭ ŝteli. Sur ĉevaloj ni foriros! Al Volgo! Aŭskultu, amiko, mi tie homojn havas — virojn fervolajn. Kaj se vi vendos min — tutegale la oron la princo ricevos. Vi kliniĝu pli malalte, aŭskultu, kion mi diros... Mi havas plenan monujon da oro. Iru, veku Serĉjon, aliajn knabojn — por ĉiuj sufiĉos...

Ankoraŭ ne mateniĝis, kiam Simĉjo, mem ne spirante pro timo, malŝlosis la pordon de la malliberejo. La gardanton ĉe la pordego Silentulo batis per rompostango, tiu falis sen krii, kvazaŭ sako kun lano. Simono tiutempe estis elkondukanta el la ĉevalejo ĉevalojn. La gardisto trans la palisaro estis frapanta per klakilo, krianta: «aŭskultu!» Lin same li devis batsvenigi. Kaj por kio kompati ilin, bojarajn servilulojn-gardistojn?

Tage la fuĝintoj jam estis en sekura distanco de Voroneĵo, veturis ne hastante. Silentulo demandadis, kie kaŝiĝas fuĝuloj, kiel trovi ilin. Simono nenion sciis bone.

La tago estis suna, sed malvarma, la grandega diafana blua ĉielo pendis super la stepo. Silentulo, kun peno movante la ŝvelintajn lipojn, parolis:

— Kompanioj! Kiaj tiaj kompanioj? Ŝipojn, vidu, bojaroj konstruas! Certe, bojaroj! Alpelis ili popolon por morti, jen kia fortego — kampuloj. Ni rampas antaŭ ili. Sed sen ni kio estos? Nek pano, nek ligno! Ni timas, pro tio malbonon toleras. Se ni

kunvenus pli multe, tiam ili timu nin, tiam la bojaroj al ni riverencus, tiam ankaŭ la caro pri ni la veron ekscius. Princojn, kaj bojarojn, kaj vojevodojn pendumi, la caron demandi: kiel ni vivos? Eble tiam ni ekvivus juste, kiel necesas...

Simĉjo estis maĉanta panpinton, ĵetadis timemajn rigardojn al la ŝvelinta pro batoj vizaĝo de Silentulo, aŭskultis lian firman, severan parolon, respondadis nedifinite:

— Tio estas vero, certe... Se kun saĝo fari...

Silentulo subite kuntiris la brovojn, ordonis:

— Veturu post mi! Abomene por mi estas paroli kun vi! Kaĵoluloj vi estas bojaraj, veraj serviluloj...

...En la sama tempo Teodoro Matejeviĉ Apraksin estis montranta al Teodoro Aleksejeviĉ Golovin la petskribon, subskribitan per sango de dvinanoj, kaj, kvazaŭ pensante voĉe, parolis:

— En proksimaj tagoj estos la Siro ĉi tie, mi donos al li ĉi petskribon, sed ĉu estos utilo? Okazas, ke li eĉ ne legas, demandas nur, pri kiu? Nu, pri la princo, pri Aleksio Petroviĉ, estu li damnita.

Teodoro Aleksejeviĉ kuntiradis la brovojn, skuadis la kapon, suspiradis:

— Ĉi tie sentimeco necesas, Teĉjo. Ĉi tie ne eblas artifiki. Vere — gutoj traboras ŝtonon... De ĉiuj flankoj — vi, mi, Menŝikov, ĉiu po malmulte...

— Ni po malmulte, sed Romodanovskij po multe.

Golovin subridis:

— Ĉiuj ni estas en la manegoj de ĉi diablo. Kion li deziros

— tion li konsilos. Per la pafistoj li ĉiam timigas...

Poste Apraksin diris:

— Eksciis mi ĝuste: tri fremdlandanoj pri li, Silvestro, denuncon skribis. Ĝuste per ĉi denunco komencis insidi princo Aleksio Petroviĉ. Li eligis fadenon, aperis araneaĵo! Dio Plejsankta, kiom da larmoj la fremdlandanoj el la popolo elbatis, kiom da sango per volo de ĉi dungitoj estis verŝita, alia Volgo povus flui. Kiel ĉi maljustecon ripari?

Golovin subridis:

— Per pacienco, Teĉjo, per nenio alia, krom per pacienco. Per pacienco kaj persisto...

Ĉapitro kvara

En val' ebena sur holmet',
Sub vasta la ĉiel',
Fortika kreskas alta kverk'
En sia flora bel'...

Merzljakov[123]

1. Estas malfacile al solulo!

Poste ili sidis en la ĉumo apud fajro kaj silente manĝis rostitan boacaĵon. Tute maljuniĝinta Pajga, sulka, kun maldensa griza barbeto, rigardis al Rjabov per bonkoraj simplanimaj okuloj, elektadis por li plej bonajn pecojn de viando, etendadis sur pinto de tranĉilo. Same agis ankaŭ la plej aĝa filo de Pajga — Sermik, same grizhara, dikmalalta, larĝaŝultra. Rjabov maĉis malrapide, en liaj verdaj okuloj reflektiĝadis flamo de la fajrejo, li pensis siajn malgajajn pensojn.

— Bone via *inka*-edzino! — diris Pajga, konsolante la rudriston. — Ĉio tute bone en urbo. *Inka* bone, filo bone...

Rjabov silentis. Sermik lerte detranĉis pecon da viando, gustumis — ĉu mola, etendis al Rjabov.

— Sata mi estas, amiko! — diris rudristo. — Jen, sata!

Sermik afliktiĝis, ankoraŭ mordis la pecon, ree etendis al Rjabov. Pajga ordonis al la filo mem manĝi tiun pecon. Por

123 Komenco de vaste konata popolkanto laŭ poemo de A. F. Merzljakov (1810), en kiu temas pri soleco de la kverko, kiu kreskas tute sola en la valo. *(trad.)*

Rjabov li detrançis alian.

— Nu, kia popolo! — diris Rjabov. — Mi diras — mi estas plenŝtopita!

Desupre ekblovis vento, fumo tuj plenigis la tutan ĉumon, la rudristo kliniĝis pli malalte, por ke la fumo ne mordu la okulojn. Pajga ĉirkaŭlekis la manojn, la tranĉilon. Sermik sidis ruĝa pro sateco, ridetis. La rudristo plu pensis, kuntirante la brovojn.

— Tempas por mi iri, jen kio! — diris li.

Pajga kaj Sermik ne komprenis.

— Prepariĝi iri hejmen tempas! — penseme ripetis la rudristo.

Nun Pajga komprenis kaj koleriĝis. Li ĉiam koleris, kiam la rudristo parolis pri la hejmo. Por kio al li necesas la urbo? Oni alveturigis lin el la urbo tute vunditan, sed li ree tien intencas.

— Nun bone iĝis! — diris Pajga, pufigante la vangojn kaj montrante per la tuta vizaĝo, kiel dikiĝis Rjabov. — Nun sana iĝis!

Kaj li ankoraŭ ŝveligis la vangojn.

Sermik, rigardante al la patro, ekridis, montrante nigrajn maldensajn dentojn.

— Multe boaco necese! — diris Pajga. — Sango necese de boaco. Tiam vi tute grasa estos, sana. Tiam bone...

— For ĝin, la sangon, — ŝerce grimacante, respondis Rjabov. — Naŭzas ĝi...

— Sango bone! — kolere diris Pajga. — Tute morta estis,

plene morta, kiam venis. Nun kia iĝis!

Sermik same koleriĝis — ili ambaŭ koleris, kiam Rjabov ne deziris manĝi freŝan boacan koron aŭ trinki varman boacan sangon. Kaj al Rjabov estis gaje inciteti ilin. Ili koleris kaj ofendiĝadis rapide, kiel infanoj, kaj kiel infanoj ĝojis, kiam Rjabov obeis ilin.

— Ne morta mi estis! — incitante, diris li. — Kion vi elpensis! Morta! Mi bona estis. Grasa... Viva mi estis, sed ne morta!

— Viva? — kriis Pajga.

— Ts-ts-ts! — ŝmacis Sermik. — Tute morta estis. Nenio parolis — jen tiel.

Kaj li montris, kian vizaĝon havis Rjabov, kiam oni alveturigis lin en la tundron kaj enportis en la ĉumon. Rjabov ekridis. Sermik same ekridis. En mallumo ekridis la *inka* — edzino de Sermik, ŝi estis lulanta infanon kaj ne rajtis sidi kun la viroj ĉe la fajro.

— Mi loĝis sufiĉe — do, tempas foriri! — diris Rjabov. — Vi mem diras — mi grasa iĝis. Baldaŭ mi nun prepariĝos, en proksimaj tagoj...

— Morgaŭ neĝo estos — ni ĉasi iros! — diris Pajga.

En tiu tempo trans la muroj de la ĉumo aŭdiĝis laŭta kolera hunda bojado. Rjabov fiksaŭskultis kaj rapide leviĝis sur la piedojn. Pajga same rapide ekstaris. Ĉiuj ili estis atendantaj el la urbo la malpli aĝan filon de Pajga, sed la hundoj ne bojus tiel kolere al Teneko.

— Iru, iru! — diris Pajga, puŝante Rjabov-on en la alian

duonon de la ĉumo, en *sinikuj*-on, kie staris idoloj-dietoj kaj pendis kristana ikono. — Iru, iru tuj, Ivano!

La hundoj nun bojis tute proksime, kaj jam iĝis aŭdeblaj voĉoj de samojedoj, kiuj kondukis la gastojn al la ĉumo de Pajga.

La *sinikuj* — sankta loko de la ĉumo, garnita per boacaj feloj, estis malhela. Rjabov kuŝiĝis tie sur boacan liton, fiksaŭskultis. Okaze de apero de soldatoj de la vojevodo li povis foriri — la stango estis antaŭ longe segita, sufiĉis nur refaldi boacajn felojn, kaj tuj — libero. Kien iri — li same sciis. La tuta popolo de samojedoj estis ĉi tie lia amiko. Sed foriri nun li ne deziris, li dum kelkaj tagoj senĉese ĉasadis en tundro kaj laciĝis...

La gastoj tiutempe jam estis enirantaj, pli ĝuste — enrampantaj en la ĉumon. Laŭ la voĉoj ili estis tri kaj, kiel ŝajnis komence al Rjabov, ĉiuj — nekonataj. Unu parolis en la rusa, ĝemadis kaj plendis al la samojedoj pri malfacila vojo, la du aliaj estis interparolantaj en fremda lingvo, kaj la rudristo rekonis iliajn voĉojn — unuokula akaparisto Chantré kaj lia servisto Franz. Jen kien nun trafis la negocistoj: ili, evidente, ree disvolviĝis, venis por ili libera vivo...

La fremdlandanoj ne rekonus Rjabov-on, tiel li kovriĝis per barbo kaj ŝanĝiĝis dum la tempo de vivo en la tundro, sed kiu estis la tria — ruso, li ne sciis kaj tial restis trans la kurteno el boaca felo. Kaj la gastoj estis brue detirantaj de si varmajn vestaĵojn, plendis, ke en la tundro estas frosto, kaj afable salutadis samojedojn, kiuj iom post iom plenigadis la vastan ĉumon de gastama Pajga.

Malgraŭ tio, ke estis jam nokto, Sermik, akriginte la

tranĉilon, kuris buĉi boacon, kaj lia *inka* komencis raboti sur tabulo frostiĝintan fiŝon. Kaj la vojaĝantoj tiutempe estis flate parolantaj pri tio, ke ili de aliaj samojedoj multe aŭdis, kia ĉasisto kaj bestokaptisto estas Pajga, kiel li riĉas je blankaj vulpoj kaj kiaj bonaj kaj respektemaj estas liaj filoj. Pajga ridis responde kaj diradis sian ŝatatan «bone».

Sermik alportis vaporantan hepaton de boaco, varmegan freŝan koron. La gastoj eksidis ĉirkaŭ la fajro, aliaj samojedoj el la nomadejo envieme staris post la dorsoj de la venintoj. Rjabov iomete refaldis la boacan felton, atente fiksrigardis: la unuokula Chantré kaj lia servisto sidis al li dorse, la ruso estis nekonata. En la mano la rusa komercisto tenis grandan kupran flaskon kun vodko — li estis respondanta per regalo al regalo.

La rudristo ĉesis rigardi, forturniĝis kun ĉagreno: ili ree drinkigos la samojedojn, tiuj ree kontraŭ groŝoj fordonos ĉion, kion ili ĉasis, ree ili, malebriiĝinte, kun nebulaj kapoj, vergos siajn dietojn, insultos la kristanan ikonon, minacos kaj al siaj ŝtipoj kaj al la rusa dio, ke ili neniam plu donos al ili eĉ peceton da boaca viando... Kaj la tempo estas vintra, necesas kaj salo, kaj novaj kaptiloj, kaj la retoj triviĝis, kaj pulvo ne malhelpus por ĉasado.

Kuŝinte iomete, li eksidis, tiris sin, fiksaŭskultis. Pajga jam estis postulanta plian vodkon, la *inka* estis elprenanta vulpajn felojn, la maljunulo minacis aĉeti tutan vodkon, kiun havas la komercistoj. Aliaj samojedoj same kuris por feloj. «Ne indus, eble, elrampi», — pensis la rudristo kaj subridis, sciante, ke li ne retenos sin, elrampos.

La gastoj ne miris, ekvidinte ruson: ĉu malmultaj homoj vagas en la tundro. Pajga ekĝojis, ekkriis per la neobeanta

lango:

— Ivano, eksidu, drinku, Ivano!

La rudristo eksidis apud la maljunulo, trankvile fiksrigardis la vulpan, kovritan de lanecaj haroj vizaĝon de la rusa komercisto, liajn rigardantajn ĉiuflanken malebriajn okuletojn. Chantré sur sia tranĉilo estis rostanta en la flamo viandajn pecetojn, trinkis propran vodkon el propra arĝenta glaseto. Lia servisto Franz estis ŝiranta per la dentoj boacaĵon, ŝmacanta, graso gutis sur liajn genuojn...

— Do, bonan festenon! — diris Rjabov trankvile.

— Eksidu kun ni! — respondis la komercisto dece, invitante samkonfesianon drinki.

— Ja mi jam eksidis! — subridis la rudristo.

La komercisto etendis al li breĉetitan tason, verŝis vodkon.

— Ĉu vi ĉasas?

— Iomete...

— Ĉu bona estas ĉaso?

— Diverse, — respondis Rjabov.

— Ĉu arĝentaj vulpoj estas?

— Kial ne esti? Estas...

— Kaj vi, fraĉjo, drinku. Mi regalas! — neglekte diris la komercisto.

Rjabov lipis, pensante pri la komercisto per vortoj de kanto: «Loĝas sur alta monto, trans fora ponto, teron ne plugas, sed grenon plukas, monon prenas kaj en monujo tenas». Li subridis, lipis ankoraŭ, deŝovis la tason.

— Kial vi ridas do? — demandis la komercisto.

— Kaj ĉu vi malpermesas?

La komercisto maltrankvile ekpalpebrumis, ne sciante, kion respondi, poste forturniĝis, decidinte ne atenti Rjabov-on. La *inka* traŝovis sin inter Pajga kaj la edzo, metis sur la genuojn de la maljunulo amason da blankvulpaj feloj. Chantré etendis la longan brakon, komencis, elstariginte la lipojn, blovi al la felo, rigardis per unu okulo la lanon. La samojedoj drinkadis, la flasko estis malpleniĝanta. Pajga fanfaronis, ke li havas multajn blankvulpojn, estas eĉ pli bonaj, multon havas Pajga. Ĉu la maljuna Pajga ne estas la plej bona ĉasisto? Kaj lia filo Sermik? Ne vane Sermik naskiĝis en tiu jaro, kiam estis multaj lupoj. Kaj Teneko? Ĉu iu povas diri, ke Teneko estas malbona ĉasisto? Bone, venos tempo — la maljuna Pajga aĉetos por sia malpli aĝa filo bonan fusilon, tiam ĉiuj vidos, kiel li scipovas pafi! Eĉ Granda Ivano, eĉ tiu laŭdas Tenekon. Nur la komercistoj ne avaru vodkon, ili ne veturu al aliaj nomadejoj. Pajga ĉi tie pagos ĉion...

Chantré palpebrumis al sia Franz, tiu, viŝinte la buŝon per la polmo, ekiris al la sledo — por vodko.

— Kial vi ne drinkas? — demandis la komercisto Rjabov-on. — Drinku, de vi mi pagon ne postulos, vi, mi pensas, estas kristano...

— Kion drinki do? — demandis Rjabov.

— Ja la vodkon...

Rjabov prenis la deŝovitan tason, elverŝis la vodkon en la flamon de la fajrejo, demandis nelaŭte:

— Ĉu alian vi ne alveturigis, sinjoro komercisto? Pro ĉi

trinkaĵo eĉ morti estas facile.

La komercisto deziris insulti, sed nur mezuris la rudriston per malestima rigardo. Negocisto Chantré ĉesis maĉi, la samojedoj, ne komprenante, rigardis jen al la komercisto, jen al Rjabov.

— Sed kiu vi estas, de kie vi aperis por mia malfeliĉo? — per plora voĉo subite demandis la komercisto. — Kia vi estas princo? Sidas morna kiel noktuo, la okulojn globigis, mi lin kristane regalas per bona vodko, sed li...

— Ne lamentu! — impone diris Rjabov. — Por kio vi bruas? Sidu, komercisto, dece. Kaj kiu mi estas — tio estas afero ne via. Nur unu aferon sciu: min la lokaj homoj konas, sed vin kun viaj amikoj ili la unuan fojon vidas. Kion mi ordonos — tio ĉi tie okazos, laŭ mi estos, sed ne laŭ vi. Se vi venis komerci — komercu, sed per via aĉaĵo ne drinkigu.

Chantré akceptis la flaskon el la manoj de sia servisto, kun favora rideto mem verŝis al la samojedoj. Rjabov severe prononcis:

— Ne plu!

Kaj eliris el la fuma ĉumo eksteren.

En la nigra malvarma aŭtuna ĉielo, kvazaŭ super maro, estis hele brulantaj kaj ŝanĝbrilantaj, flagrante per foraj fajroj, grandaj steloj, kaj Rjabov subite eksentis premon en la koro, al li ŝajnis, ke neniam plu li aŭdos la egalmezuran kaj potencan spiron de la oceano, ne ekvidos plu la maron, kiel vidas ĝin ŝipano en fora navigado, ŝajnis, ke por eterne li estas kondamnita kaŝiĝi, kiel latrono, aŭ en tajgo ĉe bonkoraj samojedoj, aŭ en subtera kelo ĉe avinjo Eŭdoĥa, aŭ ie

ankoraŭ...

Pro kio?

Ĉu lia korpo ne estas trabatita per koleraj svedaj kugloj, aŭ li en sia vivo forprenas ies panon, aŭ orfaj larmoj ie verŝiĝas pro lia maljusto?

Peze paŝante per sia balancanta, kroĉa, mara irmaniero, li ĉirkaŭiris la ĉumon, eksidis sur la komercistan sledon, enpensiĝis, gratante la kolon al akraorela hundo, alpremiĝinta al lia piedo. La hundo dolĉe suspiradis. El mallumo aliris du aliaj, ekstaris flanke, atendante, kiam ankaŭ ili estos gratataj...

— Ĉu mi dungiĝis al vi grati? — demandis Rjabov.

El la ĉumo elrampis Franz kun la flasko en la mano, aliris al la sledo. Rjabov sidis senmove, gratis la kolon al la hundo. Alia hundo, kiu staris flanke, graŭlis al Franz.

— Sufiĉas al vi vodkon drinkaĉi! — kolere prononcis Rjabov. — Iru for! Diru: malpermesite!

Franz demandis kun minaco:

— Kio estas?

— Iru for! — leviĝante de la sledo, diris Rjabov. — Iru!

Franz transmetis la flaskon el la dekstra mano en la maldekstran, per la dekstra komencis palpserĉi tranĉilon. Rjabov batis la serviston al la pojno kun tia forto, ke la tranĉilo falis. La servisto singarde kankroiris al la ĉumo. Nun ĉiuj tri hundoj estis kolere graŭlantaj. La rudristo prenis la tranĉilon, malhele brilintan sub la piedoj, metis ĝin sur bareleton, alligitan al la sledo, revenis al la ĉumo. Pensis iomete — ekiris reen al la sledo. La hundoj rigardis, atendis. Li diris al ili,

subridante:

— Jen, vidu, kion mi faros.

Li batis per la tenilo de la tranĉilo al la ŝtopilo, turnis la bareleton flanken; la vodko, gluglante, ekverŝiĝis sur la teron. La hundoj aliris por flari, Rjabov demandis serioze:

— Ne plaĉas? Ĉu? Al vi ne plaĉas, stultuloj, sed mi hodiaŭ drinkus. Ho, drinkus! Kvankam ĝi estas aĉaĵo kaj veneno, sed drinkus. Ĉe ni oni kiel diras? Malfeliĉon manĝo ne forpelas, sed drinko povas...

La vodko estis elverŝiĝanta malrapide, tiam li levis la bareleton per la manoj, klinis. El la ĉumo elrampis Pajga, kriis:

— Ivano, Ivano, malbone faras, Ivano!

— Ĝuste bone! — plu kun subrido respondis Rjabov. — Iru, avo, iru! Por la vodko mi pagos, ne gravas, ili min ne trompos, mi de ĝi, damnita, koston scias...

2. Tempas iri hejmen!

Noktinte en la ĉumo de Pajga, la komercisto severe ordonis al Rjabov pagi pro la elverŝita bareleto. La rudristo pagis — ne multe kaj ne malmulte, ĝuste laŭmezure. La samojedoj bruis ĉirkaŭe, ofendiĝante, ke gasto pagas al gasto, sed kontraŭdiri neniu kuraĝis. Kiam tute mateniĝis, Chantré komencis marĉandon: li interŝanĝadis drapajn pecojn, plumbon, tranĉilojn, kudrilojn, pulvon — por bestaj feloj. La samojedoj — malebriaj, instruitaj de la rudristo, — petis altan prezon, bonajn felojn kaŝis, interŝanĝadis tion, kio estas pli malbona. La fremdlandano pro kolero mordadis la maldikajn lipojn, la

komercisto batadis sian bruston per la pugno, ĵuradis per Dio, ŝanĝadis la varon, kaj kiam la marĉando estis venanta al la fino, Rjabov ordonis al Pajga porti vulpojn plej bonajn, ĵeti antaŭ la komercantoj felojn de blankvulpoj — ĉion, kion ili kaŝis ĝis tempo. La unu okulo de Chantré humidiĝis ĉe vido de karaj feloj, Franz elprenis el longa kesto fusilon, Pajga per tremantaj manoj tuŝis la fuston, la tubon, glatumis la fusilon, kvazaŭ vivan homon. Chantré postulis ankoraŭ vulpojn. Rjabov palpebrumis al la maljunulo — aldonu, sed ne po multe.

Pajga metis felon, Chantré ektiris la fusilon al si.

Pajga metis ankoraŭ unu felon.

Chantré ellasis la fusilon el la manoj.

Rjabov prenis pecon da plumbo, saketon da pulvo — metis al Pajga.

Chantré kriis:

— Ĉu li estas princo ĉe vi, tiu Ivano?

La samojedoj ne komprenis. Rjabov, fumante pipon, estis komandanta la marĉandon, kvazaŭ vere estus samojeda princo.

Fininte la negocon, la komercistoj forveturis. La samojedoj ree eksidis ĉe fajro en la ĉumo de Pajga; balancante la kapojn, ili pririgardadis la aĉetaĵojn, miradis pri si, kiel saĝe ĉio hodiaŭ estis farita, — la komercistoj vizitis, sed malfeliĉo ne estas, neniu ploras, neniu ŝiras sur si vestaĵojn, neniu sur la tero rampas ebria. La rudristo manĝis rabotitan viandon, per ruzaj okuloj fiksrigardadis la vizaĝojn de grizharaj samojedaj maljunuloj, pensis: «Infanoj, vere, infanoj! Ĝuste kiel naivaj knaboj...»

Poste el la urbo revenis Teneko — la malpli aĝa filo de Pajga, alportis novaĵojn de Semisadov kaj Taisja. La novaĵoj estis mallongaj:

— Malbone. Sidi ĉumo necese. Urbo veni ne necese...

Kaj jen ĉiuj novaĵoj.

Rjabov, kuntirinte la brovojn, foriris trans la boacan kurtenon, kuŝiĝis sur la dorson... Malbone! Malbone — signifas, ke Silvestron Petroviĉ-on oni ne liberigis el la prizono kaj liberigi ne intencas. Malbone signifas, ke la monstro-vojevodo plu potencas, ke la korpulenta subkolonelo en Moskvo al nenio helpis. Metinte la fortikajn manojn sub la kapon, mallarĝigante la verdajn kun fajreroj okulojn, li kuŝis senmove, pensis: Ievlev — vundita, elturmentita de sia kripleco, estas sola en la prizono, en malhela, humida, malvarma kamero. Certe, estas maldolĉe al li sola, malsana, ne sciante, kiam estas tago, kaj kiam nokto, atendi turmentantojn, torturistojn, ekzekutistojn.

Maljuna Pajga kelkfoje enrigardadis trans la boacan kurtenon: Rjabov kuŝis senmove, rigardis per malplenaj okuloj. Pajga flustris kun la filoj, riproĉis Tenekon pro tio, ke li afliktis per siaj novaĵoj la karan gaston. Teneko, tute absorbita de la nova fusilo, ne aŭdis la patron.

Vespere Rjabov eksidis sur sian ĉiaman lokon ĉe la fajro, diris, ke morgaŭ matene li foriras. La samojedoj maltrankviliĝis, Pajga kriis:

— Malbone, Ivano, malbone!

— Bone, avo! — respondis la rudristo.

Tiam la samojedoj komencis konsiliĝi inter si, — eble, ili

ofendis Grandan Ivanon? Ili bruis longe. Rjabov suĉadis sian pipon, silentis, rigardis al la fajro, kiel ĉiam en vesperoj. Super la flamo, sur ligna krado en fumo estis fumsekigata boacaĵo, la *inka* — edzino de Sermik — estis lerte kudranta per boacaj tendenoj, ĉio estis kiel antaŭe kaj samtempe — alie. Rjabov estis forironta...

Ili sciis, ke li neniam ŝanĝas siajn decidojn, kaj ne disputis kun li, sed nur petis resti kaj esti kun ili ĉiam — morgaŭ, kaj ankoraŭ morgaŭ, kaj ankoraŭ, ĉar ĉe ili estas bone, libere, vaste, kaj en la urbo estas «tro polve». Rjabov silentis ridetante, kaj la samojedoj rakontadis al li, kiel ili konstruos por li ĉumon kaj donos novajn *njuk*-ojn — boacajn litojn, por ke la ĉumo estu varma, kaj elhakos por li *um*-ojn — stangojn, por ke la ĉumo estu alta, kiel ili donacos al li boacojn multe-multe kaj hundojn donacos, por ke tiuj kunpelu boacan gregon, kaj sledon donacos, por ke li havu sur kio veturi en alian lokon...

Ridetante, li aŭskultis, kiel ili laŭdas al li sian mizeran vivon, kiun li jam bone konis, kiel ili rakontas pri profundaj lagoj, kie estas tiom da fiŝo, ke ĝin eblas elkapti nek morgaŭ, nek ankoraŭ morgaŭ, nek poste, kiel ili fanfaronas pri bero kamemoro, pri birdoj en la tundro, pri rapida, facila iro de sledoj sur neĝa krusto, pri gastamo de sia popolo.

Ili parolis longe, interrompante unu la alian, kaj iliaj vizaĝoj iĝadis ĉiam pli malgajaj kaj malĝojaj laŭmezure, kiel li rifuzadis resti.

Nokte, dum la rudristo dormis, Pajga veturis por *tadibej* — sorĉisto, kiu devis sorĉi Rjabov-on kaj sugestii al li, ke li restu en la tundro. La rudristo malfermis la okulojn, kiam la sorĉisto

staris super li en sia tufa ĉapo el gula felo, kun tintiloj, alkudritaj sur kudrolinioj de la boaca ĉemizo, kun stanaj platetoj sur la dorso kaj la ŝultroj. La sorĉisto sen palpebrumoj rigardis al Rjabov per akraj okuletoj, kaj la rudristo same rigardis al li sen palpebrumi, kvazaŭ dirante per la rigardo:

«Ja mi vin, friponon, trae vidas...»

— Bone, Ivano, bone estos! — per maltrankvila flustro el trans la ŝultro de la sorĉisto diris Pajga. — Bone!

La sorĉisto batis per sekigita lepora piedeto al sia kribrilo, tegita per boacida ledo, kaŭriĝis, ŝrikis, ekturniĝis, ree leviĝis. La samojedoj timigite ekrampis for el la ĉumo, Pajga sidis kaŭre, en liaj infanaj okuletoj estis esprimo de teruro...

— Ĉu li demonojn el mi elpelas? — demandis Rjabov.

La sorĉisto plu turniĝis. Lia tamburo krakadis, sur la vizaĝo de la *tadibej* aperis ŝvito. Abomene grimacante, li saltadis en la ĉumo, hurladis, sibladis kiel serpento. Al Rjabov tedis, li eksidis sur la feloj, glatigis la harojn, diris severe:

— Sufiĉas. Ĉu vi aŭdas? Sufiĉas, mi diras...

La *tadibej* haltis, la rudristo elprenis el la monujo moneron, etendis al la sorĉisto:

— Jen al vi pro la laboro.

La sorĉisto ĵetis la moneron sur la polmo, kaŝis ĝin sub la vangon, same eksidis. Rjabov prenis el liaj manoj la kribrilon, la leporan piedeton, rigardis la platetojn sur la ĉemizo, buntajn drapaĵojn, alkudritajn al la manikoj, ursajn ostojn sur la ĉapo, diris penseme:

— Por ĉiu estas sia ilaro. Por fiŝisto unu, por ĉasisto alia,

por popo tria, por sorĉisto same sia... Vere, nutri sin ĉiuj bezonas...

Dum la nokto falis abunda neĝo. Pajga, kompatige alpremante la manojn al la ventro, ĉiam persvadadis resti, promesadis bonan ĉasadon, timigadis per la urbo, ke oni ree tie pelos labori kaj ne nutros, sed nur knutos, kaj la rudristo ree iĝos «tute morta».

Akompani lin eliris la tuta nomadejo.

Ĉiu kondukis por li boacon — por la *inka*-edzino, por la filo, por Rjabov mem, por bona amiko, por festeno, kiun li faros, kiam revenos. Rjabov rifuzadis, la samojedoj ofendiĝadis. Tiam li komencis donaci responde — tranĉilon, pulvon, plumbon, zonon, pugnogantojn. La samojedoj, pasiiĝinte, ankoraŭ alpelis boacojn, ekportis felojn, boacidajn ĉapojn, boacfelan ĉemizon, kapuĉan peltmantelon. Rjabov, deŝirinte de la kapo la ĉapon, surpaŝis ĝin per la boto: li same pasiiĝis — se donaci al bonaj homoj, do donaci: li demetis de la ŝultro la solan, kion li havis, — fusilon, etendis ĝin al Pajga. Pajga ne prenis, forsvingis. Tiam la rudristo komencis deĵeti de la sledo vulpajn felojn. Pajga levadis, ŝovadis reen en la sledon. Ĉiuj kriegis, ĉies vizaĝoj estis ŝvitaj, ĉies okuloj brilis.

Finfine la plej aĝa filo de Pajga — Sermik svingis pelstangon, ĵetiĝis kure en la sledon, kriis gorĝe, tire:

— Ole-le-le-o!

Rjabov same falis en la malpezan sledon, la boacoj ekkuris, tuj rapidiĝante; malantaŭe la samojedoj, iĝante ĉiam malpli grandaj, svingadis la manojn, ĉapojn, kriis adiaŭajn vortojn, kaj unu el ili longe tremis en la frosta vigliga aero:

— Bone-e-e!

Rjabov pli dense envolvis sin en la lanugan, tre varman boacan ĉemizon, reĝustigis la kapuĉan peltmantelon, kuŝiĝis pli oportune en la sledo. Ankoraŭ longe vidiĝis nigraj fumoj super ĉumoj, poste ankaŭ ili malaperis. Senfina, fajreranta sub sunaj radioj tundro sterniĝis en senlime vastaj spacoj ĉirkaŭe.

Rjabov fermis la okulojn, ekdormetis.

Kaj Sermik ekkantis kanton.

Li kantis longe: rakontadis al la boacoj, al la tundro, al la ĉielo, al la neĝoj — kian bonan gaston li akompanas. Tio estas granda honoro — akompani tian gaston, kiel Ivano. Li estas multe pli forta ol la plej matura urso kaj multe pli bonkora ol la plej bonkora idolo. La samojedoj tre bedaŭras, ke de ili forveturas tia bona amiko. La maljuna Pajga ploras. Antaŭ longe mortus Pajga, se ne helpus Ivano. Li mortus antaŭ multaj jaroj, kiam sur lin oni surĵetis maŝon kaj ektrenis en la urbon. Li pereus tie. Sed Granda Ivano defendadis la maljunan Pajgan, kompatis lin kaj al neniu permesadis bati lin. Malprave forveturas Granda Ivano. Kiel restos sen li la samojedoj? Malbone al ili estos nun. Granda Ivano ĉiam konsilas ĝuste, ne ofendas maljunulojn, karesas infanojn, li povus longe vivi en la tundro, sed li subite prepariĝis kaj nun forveturas. Oni murdos lin en la urbo. Ivano estas saĝa homo, sed faras stultaĵojn, kiel malgranda infano. Adiaŭ, Ivano, nenio vin nun atendas, krom morto. Devos viaj amikoj rompi en la muro de tiu domo, kie vi mortos, truon kaj elporti vin, mortintan, al la tombejo. Tie oni metos en la ĉerkon vian tason, kuleron, pelstangon, por estu per kio peli boacojn en la transmondo, kaj super la tombo oni disrompos sledon kaj kovros per ĝi la tombomonteton. Ne,

Ivano, probable vi estas ne tiom saĝa, se vi veturas morti. Estas malbone morti! Por kio morti? Jen kiel gaje kuras boacoj, kiel ludas neĝo sub sunaj radioj, kiom estas da ĉiaj spuroj bestaj sur freŝa neĝo, kiom multe da donacoj vi havas, rusa Granda Ivano. Ne devas vi morti...

3. La spado de Atanazio Petroviĉ

Antaŭ nokto frosto iĝis forta.

Solovkiaj monaĥoj, levinte la sutanojn, kuradis en Arĥangelsko — serĉis bonan rudriston, por ke li urĝe elkonduku el Dvino grandajn monaĥejajn barkojn kaj velboatojn, venintajn en la urbon por faruno kaj grio.

Rudristo ne troviĝis. Unu foriris al Ĥolmogoro, alia dungiĝis haki arbojn kaj nur hieraŭ foriris kun la brigado, tria ekmalsanis, kvara dronis dum la batalo — falis de brulanta brulŝipo, kvina malaperis nesciate kien.

Semisadov sur lambastono, saltante en la ĉambro, diris al la Solovkiaj maristoj:

— Mi foriri ne povas, mi en la citadelo estas kiel ferdekestro. Nia estro nun, savu Dio, estas tre severa. Li knutigos ĝismorte, tiajn hundojn apenaŭ eblas trovi. Kaj al vi, honestaj patroj, kompatante vian embarason, mi konsilos: iru al Muskoj, loĝas tie vidvino de rudristo Rjabov Taisja Antipovna. Riverencu al ŝi, eble, ŝi vin kompatos, elkondukos viajn ŝipetojn...

La monaĥoj dankis, leviĝis por foriri, poste subite maltrankviliĝis:

— Sed ĉu vi ŝercas, ferdekestro? Ĉu inon kiel rudriston?

— Ni havas da faruno tritika, eble, tri mil pudojn...

— Avenon...

— Panicon...

— Da fagopiro ni havas kiom da sakoj!

— Vi al ni viron nomu, por kio inon?

Semisadov kolere respondis:

— Ŝi ekde la infaneco en la maron iradas, sed vi — viron! Ŝi en la pasinta jaro kiom da ŝipoj laŭ la Dvina ŝanelo elkondukis. Iru, patroj, ne havas mi tempon por kun vi pasigi...

La monaĥoj ankoraŭ iom ĵetiĝis en la urbo, demandis, kiu estas tiu virino — Taisja, la rudrista edzino. Al ili oni respondis, ke Taisja Antipovna estas virino de bona vivo, lerta manfaristino, pro sia vidveco multajn artojn scias, kaj lastatempe ŝi mem komencis rudri, kaj maraj laborantoj ŝin nur laŭdas. Ŝi iradas ne nur laŭ la Dvina ŝanelo, sed ankaŭ en la maron, la kompason ŝi scias, ne timema, afabla, kiom oni donos — tiom ŝi prenos, kaj ankoraŭ dankon diros.

— De kie do la ino havas tiajn sciojn? — demandis monaĥo Simeono.

— Ŝi iradis kun bonaj rudristoj, lernis... Kaj ŝia edzo estis, eble, la plej bona ĉe ni rudristo — Rjabov Ivano Sabateiĉ.

— Ĉu tiu, kiu la svedon surgrundigis?

— Tiu, patro, ĝuste tiu...

La monaĥoj ankoraŭ konsiliĝis inter si: ne indas atendi, Dvino glaciiĝos — tiam fino, restis la monaĥejo sen faruno kaj grio. Kaj ankaŭ pilgrimantoj fuĝos — estas malvarme sidi sur

barkoj kaj velboatoj. Eĉ sen tio ili, kompatindaj, jam lamentas...

Taisja akceptis Simeonon kun deca ĝentileco, tuj prepariĝis, eliris al li en botoj, en peltjako, en varmaj pugnogantoj. Ĉe la albordiĝejoj, kie staris la monaĥejaj ŝipoj kun kupraj krucoj sur la mastoj, ŝi kolektis ĉiujn monaĥojn-ŝipanojn, diris, sub kiaj veloj iri, kiel observi la antaŭan barkon. La monaĥoj skuadis la barbojn, kapjesadis. Ĉe mateniĝo vento iĝis freŝa, la Dvina akvo kovris per glacio la flankojn kaj la ferdekojn de la Solovkia ŝiparo.

— Jen ĝi — la citadelo! — diris monaĥo Simeono, deŝirante pendoglaciojn de la barbo. — Ĝuste ĉi tie la batalo estis. Jen ĝi — la ŝipo sveda, kiun via edzo surgrundigis...

Taisja silentis.

— Granda heroaĵo! — kun suspiro prononcis Simeono. — Granda! Por tia inda afero eĉ morti estas bono. Vivu la memoro pri li eterne...

Simeono fervore krucosignis sin, Taisja rigardis flanken — al la eksteraj remparoj, al la turoj de la fortreso, — rememoradis tiun malfacilan tagon. Poste kun tuta forto ŝi ekpremis la rudron, ĉirkaŭirante la malprofundaĵon kaj la alte leviĝintan pobon de la sveda ŝipo «Krono». Tie, sub malvarma vento, estis ion prilaborantaj matrosoj, aŭdiĝis frapado de hakiloj kaj krakado de deŝirataj tabuloj. Al Taisja ŝajnis, ke oni vokis ŝin kaj iu svingas al ŝi ĉapon. Ŝi kondukis la Solovkian barkon tute proksime de la malprofundaĵo kaj aŭdis konatan voĉon:

— Taisja Antipovna-a! Venu al la ska-ansoj!

«Jegorĉjo! — kun ektimo rekonis ŝi. — Jegorĉjo Pustovojtov! Sed de kie li aperis? Ĉu el la malliberejo? Kiam?» Kaj ŝi tuj decidis, ke ŝi eraris, ke Jegorĉjo ĉi tie neniel povas esti, — li suferas, kompatinda, en la arestejo.

— Ĉu konato? — demandis Simeono.

— Kiu scias! — eviteme respondis Taisja.

La monaĥo foriris en la kajuton varmiĝi, Taisja ankoraŭ foje retrorigardis al la fortreso. Malantaŭe, sub ĉiuj veloj, bele, rapide estis iranta la Solovkia ŝiparo, sunaj radioj ludis sur la kupraj krucoj.

Apud la forbrulintaj skansoj Taisja petis surakvigi por ŝi malgrandan boateton. Simeono, iomete drinkinta vodkon por bona vojo, kontenta, ke la barkoj jam hodiaŭ estos en la maro, deligis monujon, ŝutis sur ŝian polmon arĝenton, dankis:

— Nu, Taisja Antipovna, helpis vi nin, Dio vin savu. Nutru vin, kara, kaj ĉi monero estas por via fileto por kukoj.

En la skansoj ĉiuj doganistoj estis nekonataj, loĝis en terkabanoj, la forbrulintaj kazernoj nigris sub freŝa neĝo. Mornan lipharan soldaton Taisja demandis, ĉu ne ŝajnis al ŝi hodiaŭ sinjoro Jegoro Pustovojtov.

La soldato miris:

— Kial ŝajnis? Li hodiaŭ matene ĉi tie estis, nun li estas estro super ni — anstataŭ Krikov Atanazio Petroviĉ forpasinta...

— Ĉu li revenos ĉi tien?

— Certe revenos. Jen terkabanon por li la soldatoj faras. Atendu, manĝu kun ni kaĉon, verŝajne vi laciĝis rudri...

Taisja malleviĝis en terkabanon al la doganistoj, eksidis al forneto, komencis varmigi la manojn. Baldaŭ venis soldato Smirnoj, riverencis, elprenis el la sino malgrandan kanoneton, metis ĝin sur la tablon:

— En cindro sur la incendiejo hieraŭ troviĝis. Prenu, Taisja Antipovna, por via fileto de forpasinta Atanazio Petroviĉ ĝi estis farita. Lia amo, lia zorgo...

Ŝi prenis el la manoj de Smirnoj la nigriĝintan pezan kanoneton, elspiris sur la kupron, komencis frotpurigi per la maniko. La tubo de la ludila kanoneto ekbrilis ne tuj, sed ŝi frotpurigadis persiste, per gardaj, monotonaj movoj, kaj la kupro komence heliĝis, kaj poste ekbrilis, kiel varmega braĝo.

— Vidu, kia! — diris Smirnoj. — Kiel fajro brulas!

Sidante en la terkabano ĉe la forneto, Taisja dormetis, kiam venis Jegorĉjo. Li estis ne sola — kun matrosoj, maldikiĝinta, frostiĝinta, malsata. Taisja ne tuj rekonis Pustovojtov-on, — tiel ŝanĝis lin la mallibero.

— Ja mi tuj el la arestejo al Muskoj iris al vi, Taisja Antipovna, — rapide parolis li, — kaj vi ĵus al la barkoj ekiris. Mi kuris al la albordiĝejo — la monaĥoj la velojn levas. Mi kriis, kriis, ne aŭdis vi... Silvestro Petroviĉ estas sana, tenas sin. Oni liberigis min, pro kio, mi ne scias, haste, kaj tuj al la skansoj ordonis veturi — kiel dogana leŭtenanto...

— Maldikiĝis vi, Jegorĉjo...

— Ne mirinde! — subridis Pustovojtov.

Kaj, kunpreminte la lipojn, li komencis malvolvi la volvaĵon, kiun li alportis kun si. Smirnoj metis kandelon pli proksime. Jegorĉjo estis malvolvanta garde, senhaste.

— Kio estas tio? — demandis Taisja.

— Spado! — diris Jegorĉjo. — De Atanazio Petroviĉ la spado. Mi en la pasintaj tempoj ĝin por li aĉetis, li ĝin kisis, kiam estis promociita al kapitano. Kaj nun troviĝis ĝi sur sveda ŝipo. Kaj jen literoj estas gravuritaj sur ĝi, forpasinta Prokopjev faris — vidu: Atanazio Krikov... Jen sorto!

Li levis la kandelon pli alte, montris la literojn.

— Neniom difektiĝis. Ĝi estis premfiksita forte inter tabuloj. Rustaĵon ni forpurigos, en preĝejo pendigos. Indus en la citadelo, sed hundaĉo Meĥonoŝin, certe, ne enlasos...

Vespere la spado brilis kiel nova. Jegorĉjo envolvis ĝin en pecon de pura tolo. Al la terkabano, knarante sur freŝa neĝo, alveturis sledo. Jegoro kovris la krurojn de Taisja per peltjako, mem eksidis apude, ekparolis konsole:

— Kaj min oni liberigis, kaj Longinov-on. Kio okazis — mi ne scias. Ĥagajo diras — en Moskvo oni eksciis, nun la vojevodo nelonge vivos. La kancelarianoj vojevodaj estas tute timigitaj, babilas stultaĵojn. Nelonge nun Ivano Sabateiĉ atendos, baldaŭ li revenos el sia tundro.

— Li jam elturmentiĝis en atendo! — diris Taisja.

Ili veturis longe, la glitiloj iam skrapis nudan teron, la unua sleda vojo estis ankoraŭ malbona, frosta vento vipadis la vizaĝon de Taisja, ŝiaj manoj glaciiĝis. Jegorĉjo dufoje dum la vojo enkuradis en drinkejojn, varmigadis sin per vodko...

La popo de la preĝejo de Sankta Paraskeva estis ankoraŭ ellitiĝanta, kiam Taisja kun Jegorĉjo frapis al lia oblikviĝinta putra domo. Aŭdinte la frapadon, la popa edzino ekbruligis fajron, la popo eliris kolera, nesatdorminta, neniel povis

kompreni, kion oni deziras de li.

— Kapitano Krikov la svedan latronon la unua renkontis, — diris Jegorĉjo, — kaj mem la unuan batalon akceptis. Ĝuste en tiu batalo li pereis glore. Ĉi spado de li devas en preĝejo esti, tia estas por ĝi loko...

— Laŭ bono necesas fari, patro! — petis Taisja.

— Se laŭ bono, do en la templon de la citadelo vi ĝin portu! — respondis la popo. — Tio estas ne mia afero. Jen, venis antaŭaŭrore, frapas, pendigu ilian spadon. Ja tio ne estas ikono...

Jegorĉjo paliĝis, kriis:

— Vi, blinmanĝanto — mezuron sciu por babili per via langoj! Ne ikono! Ĉu vi la Arĥangelskan popolon ne konas? Morgaŭ venos al vi metiistoj, kaj portistoj, kaj fiŝistoj, vi mem al ili ĝistere riverencos, por ke ili ĉi spadon en vian altaron donu.

— Ne riverencos!

— Nu kaj diablo vin prenu, hundo vi estas, sed ne popo!

La popo ekinsultis, eksvingis al Jegorĉjo la manojn, tiu, elirinte kun Taisja, diris:

— Ne gravas, Taisja Antipovna! Morgaŭ ni portos la spadon en la citadelon, ili malfermos la pordegon, ne kuraĝos, hundoj, rompi la sanktan aferon.

Kaj li aldonis kun suspiro:

— Se estus sana eminenco Atanazio, li timigus ilin, longharulojn, ke ili longe memorus...

4. Hejme

Rjabov sidis ĉe la tablo, retrokliniĝinte sur la benko, senhaste drinkis vodkon. La avino jam ŝanĝis unu stofan botelon, kun timeto ĵetadis rigardojn al Ivano Sabateiĉ, ke li ne almanĝas. Li ne ebriiĝadis, nur liaj okuloj iĝadis pli helaj, kvazaŭ pli akrevidaj, kaj la vizaĝo iĝadis pro vodko pli severa. Maria Nikitiŝna sen larmoj, rekte rigardante antaŭ si, estis rakontanta, kiel antaŭ nelonge estis ĉi tie kancelarianoj Abrosimov kaj Gusev, ĉiujn elpelis for el la domo, komencis ŝin demandi pri Silvestro Petroviĉ, ĉu ofte vizitadis Ievlev-on forpasinta Krikov, kion ili kune faradis, pri kio parolis, ĉu menciis ili carajn malicajn malamikojn — Miloslavskij-ojn, kaj Ĥovanskij-ojn, kaj aliajn ceterajn...

— Nu?

— Certe, ne menciis, mi diris. Kaj ili ree pri la samo. Unu jen ĉi tie sur la benko sidis, kaj per la okulegoj min boris, kaj la alia malantaŭe, ĉiam krietis...

— Forpelus vi ilin kiel hundojn, Maria Nikitiŝna!

— Ili per malliberejo timigadis, Ivano Sabateiĉ. Ni, li diris, vin, malgraŭ tio ke vi estas bojara filino, en feraĵojn katenos, kaj sur pendigilon levos, tie vi kukuos laŭ ni, bone. Kaj ili ĉiam demandadis pri iu sveda homo, kiu en la citadelo estis kun honoroj akceptita. Kaj mi ja scias, al mi Silvestro Petroviĉ jam en tiu tempo rakontis, ke tio estis ruso, Jakobo lia nomo estis, nia, de la ortodoksa kredo... Ili ne kredis. Insultadis ili min per fiaj vortoj...

Ŝi firme viŝis la vizaĝon per la polmoj, movis la ŝultron.

— Kaj kion fari, mi ne scias, kion pensi. Jegorĉjon oni

liberigis, Longinov-on same, sed Silvestro Petroviĉ plu suferas, kaj neniu scias, kiam finiĝos liaj turmentoj.

— Pri kio ili tie kun Jegoro parolis? — demandis Rjabov.

— Pri la samo! Ĉu amikis forpasinta Krikov kaj Silvestro Petroviĉ.

— Kaj li kion diris?

— La veron diris: amikis. Kaj konversaciis longe, kaj duope estadis. Do, ili ambaŭ estas militistoj, ne indis mensogi...

La rudristo atente fiksrigardis al Maria Nikitiŝna, verŝis por si vodkon, malrapide filtris ĝin tra la dentoj, poste eldiris:

— Kaj pro kio vi, Maria Nikitiŝna, pensas, ke al tiuj kancelarianoj-rabobirdoj ni la veron diru? Nenion ili de ni aŭdu, eĉ ne unu vorton. Silentu kaj silentu, kaj ankoraŭ silentu. Kaj se silenti vi ne povas — diru nur: ne scias mi, ne aŭdis, ne vidis. Tiele... Ĉi kancelariano al vi nur malbonon deziras, pro via malbono al li estas bone. Do ne donu al li eĉ grajnon, eĉ se li krevus antaŭ viaj okuloj...

— Mi ja... kiel pli bone deziris, Ivano Sabateiĉ...

— Al diablo ilin, ĉi kancelarianojn! — diris Rjabov. — Poste memoru, kion mi diris. Mi ĉion vidis, Maria Nikitiŝna, mi estas muso saĝa, min oni ne trompos per fromaĝo...

Li enpensiĝis por nelonge, poste demandis:

— Teodozo Forĝisto ĉi tien ĉu ne venis?

— Probable, venis! — respondis la avino. — Sed ĝuste mi ne memoras, Ivaĉjo. Multaj ja homoj al ni venas — ne kalkuleble, ni ne solaj vivas. Kaj al ni, kaj al Maria Nikitiŝna...

La rudristo ekrigardis al Ievleva, ŝi kapjesis:

— Vere, multaj venas. El Moskvo kelkaj homoj. Strange iel. Iu venas, sidas, de kiu li venis — ne diras, poste subite iun ŝuldon redonas — kvazaŭ delonge al Silvestro Petroviĉ ŝuldas. Kiu estas li mem — silentas, poste, forirante, esperigas. Kaj ne rekte, sed kun singardo...

— Kaj ĉu multaj estis tiaj?

— Do jen — ni plu vivas, kaj monon havas...

Rjabov subridis, hele ekrigardis al Maria Nikitiŝna, demandis:

— Do, ne ekzistas la mondo sen bonuloj?

— Rezultas tiel. Malfavoron ili evitas, sed sian aferon faras...

Li ŝtopis per tabako la pipon, premis la tabakon per la fingro, ekfumis. Maria Nikitiŝna estis nelaŭte rakontanta, kiel ŝi travivis tiun tempon, kiel ŝi pereus sen Taisja kaj sen avino Eŭdoĥa, sen Ivaĉjo...

— Ne pereus! — diris la avino. — Kial kalumnii pri si.

Ŝi returniĝis kaj prononcis edife:

— Kvankam vi, patrino Maria Nikitiŝna, estas de nobela deveno, sed nobela orgojlo en vi ne estas eĉ je groŝo. Virino kaj virino, kiel aliaj kelkaj niaj dvinaninoj. Laboron vi ne neglektas, vane larmojn ne verŝas, infanoj viaj estas prizorgitaj, hieraŭ eĉ brullignon vi fendis...

— Ne mi fendis — Ivaĉjo! — ridetis Maria Nikitiŝna. — Li ne permesis!

— Ĉu same viro? — demandis Rjabov.

— Kaj kio? — diris avinjo Eŭdoĥa. — Ĉu ne viro? Ne solaj ni virinoj kaj knabinoj en la domo loĝas, ĉe ni estas knabo. Antaŭ nelonge la knabinoj — Venjo kaj Irenjo — muson ektimis, li tiun muson per balailo pelis. Viro!

— Ĉu ne timis li la beston muson?

— Li ne estas senkuraĝa...

La rudristo findrinkis vodkon, tiris sin, eliris eksteren. Jam tute mateniĝis. Ventomontrilo sur la tegmento de la domo estis plende knaranta, en la subetaĝo kriis virkoko. Estis frosto. El la banejo iris fumo, tempis porti akvon. Avinjo Eŭdoĥa same eliris sur la peronon, diris, tremerante en malvarmo:

— Kaj kio do en la mondo fariĝas, Ivaĉjo? Kiam oni lin liberigos, Silvestron Petroviĉ-on? Ĉio ŝajne estas en ordo, sed ne dormas ŝi. Ne dormas kaj ne dormas. Kiam mi nokte vekiĝas — vi mem scias, mia dormo estas maljunulina, malprofunda, — kiam mi la okulojn malfermas — ŝi rigardas. Kaj estas malhele, sed mi sentas — ŝi rigardas. Rigardas kaj rigardas...

Rjabov ne respondis, ordonis:

— Ivaĉjon veku, avinjo, mi kun li ĉiam ŝatas ŝvitbani. Li ankoraŭ ne scias, ke mi hejmen revenis. Kaj samojedon Sermik-on veku, li dormis sufiĉe. Li al sia nomadejo rakontu, kiel lin granda Ivano per vaporo kaj sapo lavis, ili aĥos...

Ivaĉjo elkuris sur la peronon, ankoraŭ ne plene malferminte la kungluiĝintajn dormajn okulojn, aĥis, ekvidinte la patron, ridinde ŝrikis pro la boacoj, kiuj, kvazaŭ en tundro, estis promenantaj sur la fortikaj hufetoj en la korto.

Duope kun la filo la rudristo longe klopodis kun Sermik, ĝis li permesis, ke oni deŝiru de li ĉiujn liajn vestaĵojn. Avinjo Eŭdoĥa, albalaante profundan neĝamason en la korto, balancadis la kapon, aŭskultis la gajan bruon en la banejo, ridetadis:

— Nu, diabloj, pardonu Dio, vere diabloj! Por malliberejo li sin ŝvitbanas, sed kion faras...

Kaj batadis al la baneja muro per la tenilo de la balailo:

— Frenezuloj! La banejon vi rompos!

Tie ree per lepora voĉo kriis Sermik. Base respondis, persvadante, Rjabov. La pordo skuiĝis, poste ree ĉio kvietiĝis. Rjabov estis diranta al Sermik:

— Ja kial vi obstinas, knabo! Jen kia viro vi naskiĝis, sed banejon timas. Kiom da ursoj vi venkis, la unua ĉasisto en la tundro, sed akvo kun sapo por vi estas timo. En banejo sin lavi estas malbonon kaj mizeron forlavi, belon kaj bonon allavi...

Ivaĉjo saltadis supre, sur la kuŝbreto, de tie kriadis:

— Paĉjo, li al ni rigardos — kaj mem komencos laviĝi. Paĉjo, je Dio tiel!

Sermik — nuda, muskola, kolera — insultadis:

— Morta mi estos pro bano, kial vi malbone faras?

Rjabov ĉerpis per ligna sitelo bolakvon, enverŝis en tinon kun malvarma akvo, petole ŝprucigis al Sermik. Sermik saltis, ekkriis, post la patro ŝprucigis Ivaĉjo, poste ankoraŭ foje Rjabov. Sermik ĉesis ŝriki — ekridetis, rigardante al Rjabov kaj Ivaĉjo, frotis ĉifonon per sapo, disŝmiris sapan ŝaŭmon sur la brusto kaj la larĝaj ŝultroj.

— Kiel, frato, ĉu bone? — demandis Rjabov.

— Bone, bone! — respondis Sermik. — Se mi ne estos morta — tiam tute bone...

Ili lavadis sin kaj ŝvitbanis longe.

Kiam ili estis ripozantaj, sidante triope sur la kuŝbreto, Ivaĉjo demandis mallaŭte:

— Paĉjo, kaj ĉu tio estas vero, ke vi latronan ŝipon surgrundigis antaŭ kanonoj?

Rjabov ekĝeniĝis; glatumante la filon sur la malseka, en etaj bukloj kapo, respondis:

— Ne gravas tio...

Ivaĉjo levis al la patro la okulojn, demandis obstine:

— Do ĉu surgrundigis aŭ ne?

— Necesis, tial surgrundigis, fileto...

Ivaĉjo kapjesis kontenta, poste ankoraŭ demandis, pririgardante cikatrojn sur la dorso, sur la ŝultroj de la patro:

— Ĉu pro tio estas la vundoj, paĉjo?

— Pro tio, infano...

— Do, honestaj vundoj, paĉjo?

— Honestaj, Ivaĉjo! — komprenante, ridetante, respondis la rudristo.

Sermik same movis la fingron laŭ la cikatroj, klakis per la lango, balancis la kapon:

— Ĉu urso?

— Urso, urso, frato! — plu ridetante, respondis Rjabov. —

Sveda urso...

Ne findirinte, li subite ululis per kobolda voĉo, puŝis per la kapo la pordeton, ĝi defalis eksteren en la frostan tagon. Rjabov elĵetiĝis en la neĝamason, albalaitan de avinjo Eŭdoĥa. Ivaĉjo, ŝrikante, ĵetiĝis post la patro. Ambaŭ, kvazaŭ turboj, ekturniĝis en la loza neĝo, leviĝis, ekkuris reen en la banejon, en la plej varmegan bruligantan vaporon; Sermik rigardis al iliaj ruĝegaj korpoj per globiĝintaj okuloj, klakadis per la lango...

Post la bano, langvoraj, ili trinkis kun gastoj kvason, kun Timoteo Koĉnev, kun Ivano Kononoviĉ, kun ferdekestro Semisadov. Ili parolis pri la ŝipoj, savitaj kontraŭ la svedo. Nun la floto staris en Solombalo. Samloke estis rigataj ankaŭ aliaj ŝipoj. Ivano Kononoviĉ plendis, ke nun sen Ievlev laboroj iras malrapide, la fremdlandaj majstroj tute nenion faras, la vojevodo en ŝipkonstruado nenion komprenas, kaj oni aŭdas, ke la caro ĝis somero intencas esti en Arĥangelsko...

— Do, konservis ni la ŝipojn? — morne demandis Rjabov.

— Konservis! — diris Ivano Kononoviĉ, kaj liaj okuloj post la okulvitroj ekbrulis. — Ho, ŝipoj! Se vi vidus, rudristo! Grandaj, bonaj, por oceana iro...

— Ni konstruis, kaj ni konservis! — same morne rimarkis Rjabov.

Ferdekestro Semisadov per singarda voĉo rakontis novaĵon, ke li antaŭ nelonge aŭdis: veturas en Arĥangelskon nova vojevodo — tablestro Bazilo Andrejeviĉ Rĵevskij, kaj pri la princo kvazaŭ oni nenion scias. Ĉu estos li ĉi tie sen posteno, ĉu li veturos nutri sin en aliajn lokojn.

Rjabov aŭskultis indiferente, al la novaĵoj ne ĝojis.

— Eble, estos pli facile iomete al la popolo! — diris Semisadov.

— Pro ili estos pli facile, atendu! — respondis Rjabov. — Tiu estas tablestro, ĉi tiu — princo. Popo popon riproĉas — nur per fingro minacas...

— Nu, mi esperas, — diris Koĉnev. — Mallongigos oni, eble, la voston al Prozorovskij...

— Sed povas esti, io vere Moskvon atingis? — demandis Semisadov.

La rudristo ne tuj respondis, rigardis al flamo en la forno. La avinjo ĉe la fenestro estis faranta paston por pirogoj, suspiranta:

— Necesas paston fermentigi, sed ĝojo ne estas, — ne leviĝos la pirogoj, ho ve...

Ĉe la pordego, kie blovis malvarmo de la korto, estis dormetanta Sermik, trans la muro estis pri io disputantaj la filinoj de Ievlev. Ivaĉjo staris apud la patro, rigardis al li kun atento, aŭskultis, kiel tiu parolas:

— Moskvon atingis, certe... En akvo, fratoj miaj, estas niksoj, en tero — vermoj, en Krimeo — tataroj, en marĉo — ranoj, en urbo — ĉikanoj. Iru en balenan ventron, tie faru fenestron kaj vintre restu, nenien plu iri eblas...

La ŝipaj majstroj kaj la ferdekestro ridis. Ivaĉjo demandis:

— Ĉu tio estas fabelo tia, paĉjo?

— Ne fabelo — realaĵo! — respondis Ivano Kononoviĉ.

Ili ankoraŭ iom sidis, parolis. Semisadov diris:

— Nesingarde vi tamen, Ivano Sabateiĉ, en la urbon ja venis. Ne okazu malbono...

La rudristo ĵetis rapidan rigardon al la ferdekestro.

— Kia malbono? Mi mem en la malliberejon iros, al la arestejo. Kiom eblas kaŝiĝi? Kaj li, la kapitan-komodoro, kion atendu bonan, kiam la rudristo fuĝis?

— Ĉu vi malsaĝiĝis? — demandis Semisadov.

— Mi estas pli saĝa, ol vi! — respondis Rjabov. — Li tie estas senforta, liaj vundoj doloras, sola, kaj ankoraŭ pro mi respondas. Ne, mi al ili, hundoj, mem respondos. Bonon necesas memori, kaj ĉu ne Silvestro Petroviĉ en tiuj malnovaj jaroj la paperon por mi elpetis de la caro, ke la monaĥoj min en sia subteraĵo ne putrigu? Kaj ankaŭ vi, mi pensas, memoras, kiel ni kun soldatoj en la monaĥejon venis, liberigis la fiŝistojn kun Metrio forpasinta. Li ankaŭ al Taisja mia multe helpis, kiam mi sur Grumanto vintris, li ankaŭ por Ivaĉjo mia estas baptopatro... Ne, frato, hontas mi tiel vivi.

Ivano Kononoviĉ suspiris:

— Honte, tamen sate...

Semisadov interrompis:

— Tio estas vero, ke homo li estas nemalbona, kaj kiam la batalo estis — de lia kapo la afero estis solvata. Li kaj la fortreson konstruis, kaj la kanonojn gisis, kaj...

— Vere, li.

— Tio ne estos malbona, eble! — konsentis Semisadov. — Devas ĉio al bono fariĝi. Al vi, Ivano Sabateiĉ, ĉio ajn

okazadis, tamen vi plu estas viva. Kaj en la maro, kaj sur Grumanto, kaj sur la sveda ŝipo. Nu, ankaŭ nun vi viva revenos. Eble, pro tio, ke vi vivas laŭ justo...

Rjabov ekridis, respondis ruze per anekdoto:

— Kiel tiu virino, kiu gastinon regaladis, sed, ektiminte, diras: finmanĝu, baptanino, la naŭan flanon, tutegale mi de la edzo estos batita...

La ŝvela pordo kun bruo malfermiĝis, eniris Taisja, per timigita voĉo demandis de la sojlo:

— Ĉu venis?

— Venis! — leviĝante renkonten al la edzino, respondis Rjabov. — Sufiĉas en tundro sidi.

Kiel ĉiam publike, li parolis kun ŝi mallonge, per abruptaj vortoj, sed liaj okuloj rigardis arde kaj atente, same, kiel antaŭ multaj jaroj, kiam li dungiĝis kiel ĉasisto al ŝia patro. Kaj same, kiel tiam, ŝi kvazaŭ malfortiĝis pro tiu rigardo.

— Vivus vi kviete en la tundro, — mallaŭte diris ŝi. — Jen, dank' al Dio, kia vi sana iĝis... Kion vi ĉi tie faru?

— Eĉ kapro, oni diras, estas okupita, — ridetante, respondis la rudristo. — Ankaŭ ĝi havas sian klopodon: necesas ĉevalojn al trinkejo akompani...

— Kaptos oni vin, Ivaĉjo...

— Sed mi ne lasos! Mi mem la unua tien iros.

Taisja sciis, ke li ne ŝercas, same, kiel komprenis, — li venis en la urbon nur por mem iri al la arestejo... Sed ĉio ĉi estis tiel terura, ke ŝi ne deziris kredi, kaj ŝi nun nur forsvingis kaj silente komencis detiri la ledajn fiŝistajn pugnogantojn,

malvolvi la kaptukon, demetis la piedvestojn. Ŝi eĉ ridetis, sed larmoj malgraŭ ŝia volo fluis sur la vangoj, kaj la ŝultroj komencis skuiĝi pro ploro.

— Do kial vi, Tainjo? — konfuziĝante pro la vido de la ploranta edzino, demandis Rjabov. — Ĉu laciĝis vi?..

— Ne laciĝis, — ploregante kaj ne sciante, kion respondi, parolis ŝi, — ne laciĝis mi, sed... ankoraŭ malfeliĉo, Ivaĉjo: de sinjoro Krikov la spadon oni trovis, de Atanazio Petroviĉ... Veturigis ni tiun spadon en la preĝejon, — ne prenis la patro... Ĉiuj timas, la vojevodon timas. Eĉ la popo timas, sed pro kio? Per kio li, la forpasinto, pekis? Pro kio oni la spadon en la preĝejon ne prenas?

Taisja, plorsingultante, fermis la buŝon per la polmo, en la domo estiĝis plena silento. Poste Semisadov diris kun obtuza minaco en la voĉo:

— Ne gravas, ni ne timos! Ne timemaj ni estas! Ni faros, kiel necesas! Morto ne estas ludo, kaj kiel Atanazio Petroviĉ akceptis la morton — donu Dio al ĉiu militisto. Estos lia spado en preĝejo, kaj ne en la Paraskeva, sed en nia, la fortresa. Kun honoro ni tiun lian gloran spadon enportos, kaj neniu nian vojon baros, kaj se iu baros — ni lin forigos. Ĉu prave mi diras, Ivano Sabateiĉ?

— Prave! — firme kaj trankvile respondis Rjabov.

5. Kiel alie fari?

La novaĵo pri la trovita spado de la heroa kapitano Krikov, origina dvinano kaj bona homo, fulme ĉirkaŭflugis la tutan urbon Arĥangelskon. Tiuj, kiuj amikis kun Atanazio Petroviĉ,

kiuj konis lin proksime, multe zorgis pri tio, kaj per drastaj vortoj insultadis la arĥangelskanoj tiun raban popon, kiu aŭdacis rifuzi akcepti en la preĝejon la armilon de la pereinta kapitano.

Pafista kolonelo Vilhelmo Noble raportis pri ekscitiĝo de la popolo en la urbo al princo Prozorovskij. Tiu kolere snufis, tamen kontraŭagi ne kuraĝis, nur diris:

— Estus bone malgrandigi al ili, diabloj, fervoron, sed kiel tion fari? Jen kio, kolonelo... vi, tio! En la fortreson ne indas la spadon treni, sed estas ĉi tie apud la Komerca korto kapelo nome de la Tuko Nehomfarita[124], tie oni lian spadaĉon pendigu. Ne por ĉiam, sed nur por tempo. Tutegale ĉi Krikov estas transfuĝinto — li al la svedoj en kaptitecon foriris, ĝuste tiel mi al Moskvo skribis...

Vilhelmo Noble kun miro levis la brovojn: la vojevodo en la lastaj tagoj komencis diri tiajn absurdaĵojn, ke eĉ la al ĉio kutimiĝintaj kancelarianoj nur interpalpebrumadis.

— Sed la loĝantoj, ĉiuj lokaj metiistoj kaj aliaj plebanoj dezirus vidi la spadon ĝuste en la fortresa preĝejo! — prononcis la kolonelo.

— Ne indas!

— Ili bruos!

— Kiel ordonite faru! — prononcis, ne aŭskultante,

---

124 La Tuko de Edessa, «ne farita de la homaj manoj», estis tolaĵo kun la vizaĝo de Jesuo, opiniata aperinta per miraklo; ĝi estis konservata en Konstantinopolo kaj malaperis dum la kvara krucmilito. (Iuj opinias, ke ĝi povas esti la sama Mortotuko, kiu estas nun konservata en Torino). Laŭ ĝi estis faritaj ĉiuj postaj bildoj de Kristo sur ikonoj. Ĝi estas kultata de la Ortodokskristana eklezio. *(trad.)*

Prozorovskij.

La kolonelo parolis. La vojevodo, apoginte per la manoj la ŝvelintan, nekomprenantan vizaĝon, rigardis al la murtapiŝo, sur kiu estis pendigita riĉa armilaro. «Ho, mia Dio, li ree estas tute ebria!» — pensis Noble, riverencis kaj foriris.

Post la konversacio kun la kolonelo la vojevodo okupiĝis kun la kancelarianoj. Kancelariano Abrosimov dismetis antaŭ la princo pridemandajn foliojn kaj rakontis, kio hieraŭ estis farata en la arestejo: kiu estis torturata facile, kiu duan fojon, kiu forte de torturo «konsternita» estis, kaj kiu ne eltenis — ellasis la animon.

— Kio pri Pustovojtov? — demandis la vojevodo.

— Liberigita, kiel de vi, patro princo, estis ordonite. Ke forte amikis inter si Krikov kaj via maliculo Ievlev — ĉio ĉi laŭ liaj vortoj estis skribita, kaj kion plian ni bezonas?

— Kiu la petskribon al Moskvo veturigis? — demandis la vojevodo.

Kaj kriis per furioza, freneza voĉo:

— Mi ekstermos ĉiujn, ekscios la veron, maliculoj kontraŭ mi, murdistoj, herodanoj! Kie estas tiuj latronoj, kial ne torturitaj, pro kio ne kaptitaj? Kiu fidelan mian dumaanon Larionov-on mortpafis? Kun muskedoj, kun fusiloj al Volgo ili foriris por rabi, malicaj malamikoj de la caro, sed por vi tio estas nenio? Kien vi rigardis, hundoj? Kie estas malamiko mia, kampulo Forĝisto?

La kancelarianoj, konfuziĝinte, balbutis galimation, la vojevodo ŝovadis la grasan pugnon al iliaj vizaĝoj, piedfrapadis; ardiĝinte, li tiris Molokojedov-on je la barbo,

ektrenis por torturo. Tiu ŝrikis per porkida voĉo, la princo forĵetis lin, falis sur la benkon. Abrosimov, etendante la kolon, flustris:

— Ne alie, ol de Maria Nikitiŝna estas la tuta malbono, ne alie, ol de ŝi. Ŝi sidas en la domo de Rjabov — fiera, pala, eĉ guto da sango en la vizaĝo ne estas, sed plu al ni kiel al favaj hundoj rilatas. Sentima sorĉistino! Kaj de ŝi homoj en Moskvo estadis, kaj al ŝi iuj vizitantoj venadis — tio estas certe sciate, princo-vojevodo. En hela tago ili timas, sed kiam estas pli malhele — ili tuj tien, al Muskoj.

— De kiu estis la venintoj?

— Tio ne estas enketita. Eble, ĝuste de sinjoro Apraksin mem — malica via malamiko, eble, de Golovin Teodoro Aleksejeviĉ, eble, de Menŝikov... Antaŭ nelonge en la bazaro oni diris: kvazaŭ estis ĉi tie kaŝe iu homo, nomis sin inspektisto, pri vi arogante demandis, kaj kiam oni intencis ligi liajn manojn, li malaperis senspure...

— Ne kaptis lin, herodoj! — ŝrikis la princo.

— Tute ne! — diris el malproksime, nelaŭte, sed kun aroganteco en la voĉo, la batita Molokojedov. — Tute ne tiel, princo! Ĉi inspektisto havis paperon kun sigelo kaj subskribo...

— Kies subskribo?

— Jen, kies! De Apraksin mem. Malkvietigas li tie kaj en Moskvo kaj en Voroneĵo, ĉion kontraŭ la princo-cezaro faras, kroĉiĝis per la dentegoj tiel, ke ne eblas deŝiri.

La vojevodo leviĝis, piedbatis ekkurintan for de li katon, ekiris el angulo en angulon. La kancelarianoj staris time ĉe la pordo, li kvazaŭ forgesis ilin, kaj ili foriris sen ajna ordono.

Pli poste alveturis Meĥonoŝin, maltrankvila, kolera. Ĉirkaŭlekante la maldikajn lipojn, li demandis, ĉu estas vero, ke Rĵevskij jam estas sur vojo el Moskvo al Arĥangelsko. Al la princo malfortiĝis la kruroj, li malfermis la buŝon, longe ne povis eldiri eĉ vorton, poste flustre demandis:

— En Moskvo do, en Moskvo kion oni al vi diris? Ĉu pri tio temis? Oni favoris, pridonacis, sed nun subite...

— Evidente, oni ion novan eksciis! — diris Meĥonoŝin. — La princo-cezaro tiel, sed aliaj alie. Tro vi simpla estas, Aleksio Petroviĉ, tro malforta estas via kapo. Ĉi tie pensi necesas...

— Sed kiel pensi, se Rĵevskij veturas?

— Li veturas senhaste. Al li ankaŭ en Vologdo aferoj estas komisiitaj.

Kaj, tordante la vizaĝon pro malamo al la vojevodo, Meĥonoŝin ekparolis pri tio, ke pri la malfeliĉo neniu kulpas, krom la princo mem: antaŭ longe necesis fini kun Ievlev, mortintoj ne babilas, li mortis en malliberejo — kaj ne estas demandoj. Malfeliĉon havas nedecidemaj, malfortaj, tiuj, kiuj neniun aferon ĝis la fino povas fari. La latrono kapitan-komodoro, se post la batalo tenus pli firme la fremdlandanojn, eble ne enkaĉiĝus, kiel nun. Kaj eĉ pli bone por li estus mortigi en la fortreso kaj Ripley-on, kaj Swenberg-on, kaj Loftus-on. Verŝajne, nun li pro ĉagreno la fingrojn ronĝas...

— Do vi instruu, kion mi faru? — ekbalbutis la princo. — Kiel mi vivu do, ho Dio favora...

— Kiel?

Meĥonoŝin kliniĝis al la vizaĝo mem de la vojevodo:

— Ja tiel, ke unue fini kun Ievlev! Nokte kun fidelaj homoj strangoli lin en la subteraĵo, — kiu ekscios, pro kio li mortis?

— Kie do tiujn homojn preni?

— Se ili forte necesos — vi trovos. Antaŭ longe vi devus tion fari, jam en tiu tempo, kiam mi en Moskvo estis, pulvoron alŝuti, aŭ per maŝo strangoli, aŭ per hakilo en malhela horo al la kapo. Kaj Jegoron kun Longinov vi vane liberigis, ne necesis...

— Por vi estas facile diri, kiam la letero de Apraksin estis ne al vi, sed al mi...

— Kaj vi transsendus tiun leteron al Romodanovskij: diru al mi, patro princo-cezaro, kiun mi aŭskultu... Kaj kun ruzo, por ankaŭ sur Teodoron Matejevič-on pli nigran ombron ĵeti. Sinjoro Romodanovskij sola kontraŭ ili ĉiuj staras, sola al neniu kredas, sola sian penson pensas. Li vian epistolon, princo-vojevodo, eble ĝis tempo tenus, kaj kiam super Apraksin ia nubo pendos — la letero taŭgus. Vizitadis mi lin, mi scias, kion la princo-cezaro deziras. Kaptas vi ĉi tie en Arĥangelsko kontraŭcarajn latronojn, kiel en Azovo faradis, batas ilin senkompate por plezuro de la cara moŝto, hakas la radikojn, sed tiuj radikoj malproksime etendiĝis — kaj al Ĥovanskij-oj, kaj al Miloslavskij-oj, kaj ankoraŭ al nesciate kiu. Mi mem pri tio al la princo-cezaro diris en Moskvo. Kaj la iniciatintoj de la tuta afero ĉi tie estas du: la unua — Krikov, lin pri ĉio kulpigi eblas, li ne respondos. Diru, ke la pafista ribelo en Moskvo same ne sen li okazis. Se Jegoron oni levus sur pendigilon, li ankaŭ pri Ievlev samon dirus. Silvestro nun estas malforta — post dua, post tria torturo mortus...

Meĥonoŝin pensis iom, aldonis:

— Ne, nun, verŝajne, estas malfrue, princo. Vi jam ne venkos. Timema vi estas. Vi mem ĉion pereigis. Kaj la kampulojn, kiujn mi kunpelis tiam, ne indis liberigi, en torturo ili multon dirus...

— Sed ĉu mi... Ho Dio... Ili per sia volo, ili mem foriris...

— Por tio vi estas vojevodo, ke ne per ilia volo ĉio fariĝu, sed per via, Aleksio Petroviĉ. Nun, anstataŭ tordiĝi en via malliberejo — ili estas liberaj. La dumaanon murdis, foriris rabi, bruligas bienojn...

— Kion fari do? — per tremanta voĉo demandis Prozorovskij. — Ĉu ni pereos nun?

— Kiuj ne finfaras — tiuj pereu! — senkompate respondis Meĥonoŝin. — En tio timo ne konvenas. Aŭ tiel, aŭ ĉi tiel. Aŭ vi kapon hakos, aŭ al vi oni hakos. Kaj pro kio haki — estas. Kaj vere li, la caro, longe silentas, paciencas, atendas. Estis fidela por li servanto princo Prozorovskij. Sed se ĉio malkovriĝos...

La vojevodo tute malkuraĝiĝis, ekpetegis:

— Leŭtenanto, kara! Sola mi estas, estas neniu konsilanto, ordonu, kion fari, ĉio laŭ vi estos: per kiuj homoj Ievlev-on fini, kiun kapti. Instruu, kara, ne lasu min en amara horo, savu...

La leŭtenanto, oscedetante, kvazaŭ li mem tion ne bezonis, komencis diri, kiel necesas fari plu. Prozorovskij aŭskultis, flate kapjesadis, dankadis...

Al la pordo oni frapis, venis Molokojedov, alportis leteron. La princo deŝiris sigelon, Meĥonoŝin akceptis el liaj tremantaj manoj la paperon, legis unue mense, poste per impertinenta,

senhonta voĉo laŭte. La letero estis tute mallonga: ke veturas al Arĥangelsko kiel vojevodo por Dvino princo Bazilo Rĵevskij, kaj princo Prozorovskij pro multaj liaj servoj kaj pro maljunaj jaroj kaj fortaj malsanoj loĝu ekde nun kie li deziros — ĉu en sia bieno, ĉu en Arĥangelsko, ĉu en Ĥolmogoro...

— Vidu, kiel! — flustre eldiris Prozorovskij.

— Jen tiel, — subridis Meĥonoŝin. — Evidente, atingis la petskribo...

— Kial do evidente? — demandis la vojevodo. — Estas dirite: pro multaj servoj kaj pro maljunaj jaroj kaj fortaj malsanoj. Se ĝi atingus — ĉu tiel estus?

— Atingis, atingis la petskribo, patro! — enmiksiĝis Molokojedov, kaj lia vizaĝo jam esprimis nenian respekton al princo-vojevodo Prozorovskij. — Forigis oni vin, Aleksio Petroviĉ, de la nutriĝo — tio estas unue, kaj poste, probable, estos juĝo, denuncojn oni legos, homojn pridemandos. Oj, malbone estas al vi, patro, malbone, princo, tute malbone...

Kaj sen permeso, sen riverenco Molokojedov ekiris al la pordo — distrumpeti en la urbo, ke al la vojevodeco de Prozorovskij venis fino, rakonti pri li verojn kaj malverojn, suspiri, balanci riproĉe la kapon kaj plendi, kiel malfacile estis sub li plenumi la caran servon...

— Vi... kien? — laŭ la malnova kutimo kriis la princo, sed tuj rekonsciiĝis kaj svingis la manojn: — Iru, iru! Iru jam...

Sed Molokojedov ankoraŭ staris iom kun ridetaĉo, palpebrumis, kaj, same ne riverencinte, foriris por ĉiam el la vojevoda domo.

— Kion do ni nun faros? — demandis Prozorovskij per tute

timida, kulpa voĉo Meĥonoŝin-on. — Kion nun fari, leŭtenanto? Eble vere por eviti pekon iri en la bienon, kaj trasidi tie kvietege la minacon. Kion vi diros?

— En la bienon? — kun malbona subrido prononcis Meĥonoŝin.

— Tien. Kvietege.

— Kaj el tie oni prenos! — diris Meĥonoŝin. — Apraksin havas longan brakon. Se ne hodiaŭ, do morgaŭ, sed tamen prenos. Nepre prenos... Ja ne estas urĝe. Pri viaj aferoj ne ĉiuj scias, kaj, verŝajne, oni ankaŭ memoras viajn meritojn en Azovo. Alie oni tuj en lazo vin ektrenus, ĉar, princo, faris vi ĉi tie aferojn, misis grave...

Prozorovskij raŭkis ion malklaran, sidis molaĉa, rigardis per malplenaj okuloj. Meĥonoŝin leviĝis, diris, ke venos poste, kaj tiam ili decidos, kion fari; senhaste, fajfetante, li ekiris al kancelariano — ricevi caran salajron por ĉiuj servantoj de la Novdvina citadelo. La mono estis multa, ili kalkulis longe, Meĥonoŝin ne unu kaj ne du fojojn ĉion rekalkuladis dekomence. Por vigleco la leŭtenanto ordonis alporti duonstofon da vodko.

— Kiel estas la vojevodo? — demandis la kancelariano.

— Malbone! — respondis Meĥonoŝin. — Respondecigos oni lin, severe respondecigos.

— Ja neeviteble...

La kalkulitan monon la kancelariano serveme enŝutis en ledan sakon, ekiris akompani la leŭtenanton ĝis la perono, Meĥonoŝin alligis la sakon al la selo, kaptis per la piedo la piedingon, ne retrorigardante elrajdis ekster la pordegon.

Ĉi tie lin atendis du soldatoj — akompani la monon. Li diris al ili, ke monon hodiaŭ ricevi li ne sukcesis, pririgardis per distrita rigardo la straton, ĉirkaŭveturis la Komercan korton kaj, frapinte per la tenilo de la skurĝo al la drinkejo de Magrulo, ordonis elporti la plej bonan vodkon. Magrulo elportis.

— Jen, kaptu! — diris Meĥonoŝin kaj ĵetis al la drinkejmastro oran moneron.

Magrulo kaptis la moneron, riverencis.

Meĥonoŝin, ne glutante, elverŝis en sian gorĝon la vodkon, almanĝis per pankrusteto kaj forte kunpremis per la spronoj la flankojn de la ĉevalo. La virĉevalo tuj ekgalopis al la Ĥolmogora vojo.

Magrulo akompanis la oficiron per rigardo, revenis en la drinkejon, diris al du matrosoj el la citadelo, kiuj estis ludantaj ĵetkubojn pri fingrofrapoj:

— Via leŭtenanto mem venis. Malavara! Ŝajne riĉiĝis!

— Domon al li je ses tabuloj[125]! — respondis unu el la matrosoj. — Hundaĉo li estas, sed ne leŭtenanto...

La alia aldonis:

— Bonaj homoj ne vivas, mortas, sed tia fiulo — ĉu vi vidas? Per gajaj piedoj iras...

La pordo knaris, eniris ankoraŭ ĉirkaŭ dek matrosoj; Magrulo verŝis al ili vodkon po malgranda glaseto, ĵetis en bovlon salitan fiŝon. Ili eltrinkis ne sidiĝante; la supera — larĝŝultra, ruĝvanga — ordonis:

---

125 T. e. ĉerkon *(trad.)*

— Ni iru rapide! Post la liturgia servo oni tuj la spadon elportos!

Magrulo divenis:

— Ĉu de Atanazio Petroviĉ?

Li vokis la diklipan helpanton — gardi la drinkejon, surmetis vulpan peltmantelon, ĉapon, pugnogantojn. Laŭ la strato estis haste iranta popolo: pafistoj en buntaj kaftanoj, subŝtofitaj per tondita ŝafa pelto, matrosoj en siaj malmolaj senvarmaj jakoj, metiistoj, fiŝistoj, fiŝistaj edzinoj, ĉasistoj, doganaj soldatoj.

Ĥagajo Pustovojtov kolumne kondukis siajn matrosojn, la dogansoldatojn komandis Jegorĉjo, sur ĉevaloj rajdis la dragonoj. En la mallarĝa Trabata strato la popolo subite haltis, la vojon baris la pafistoj de kolonelo Vilhelmo Noble. Sidante en alta selo, grandnaza, grizblua pro malvarmo, li kriis, ke trairo al la rivero ne estas, ke la spadon estas ordonite porti en la kapelon de la Tuko Nehomfarita, ke en la fortreso teni ĝin estas nekonvene. Iu malalta, larĝŝultra ŝarĝisto kun malamo en raŭka voĉo kriis:

— Vi viajn fremdlandanojn instruu, ni mem scias, kion ni faru!

Kupristoj, panistoj, kvasistoj, aliaj metiistoj tuj ekbruis, ekinsultis:

— Forrajdu de la vojo!

— Ni respekte petas!

— Amikoj, premu!

— Je la brido lin prenu, je la brido!

La bunta virĉevalo de la kolonelo retropaŝis, la pafistoj, subridante, komencis turni siajn ĉevalojn en la flankan strateton. Noble-on oni alpremis al alta palisbarilo, la popolo traŝiriĝis, ekiris per rapidaj paŝoj. La spadon sur pura, brodita de la manoj de Taisja kuseno portis doganisto Smirnoj, dekstre alia soldato portis la doganan vimplon. Post la urba bariero tamburistoj akorde elbatis paradan marŝon. Sur la neĝo hele, vintre blindige lumis la suno, de piceoj, de betuloj estis falantaj brilantaj neĝeroj. Rjabov iris apud Ivaĉjo, laŭvice prenadis sur la brakojn la rapide laciĝantajn filinojn de Ievlev. La popolo rigardis al li, ĉiam pli laŭte interparoladis homoj: jen iras la rudristo Rjabov, tiu, kiu surgrundigis la malamikan ŝipon, tiu, kiu kvazaŭ estis mortigita. Loĝantoj turniĝadis al li — grandega, larĝŝultra, hele rigardanta antaŭ si, rekonadis Ivaĉjon, rememoradis tiun tagon, la viktorion, tondradon de kanonoj, fajfadon de kuglegoj, la svedajn standardojn sur la ŝtonoj de la fortresa placo.

Post Smirnoj la spadon portis Jegorĉjo Pustovojtov, poste kanonisto — maljuna, grizhara. Pri li oni rakontis, ke li per sia kanono debatis svedan poban flagon. Ju pli malproksime laŭ la bordo de Dvino moviĝis la procesio, des pli da homoj aliĝadis al ĝi. Dvinaj fiŝistoj, zonante sin dum kurado, kuratingadis la popolon, kuris edzinoj, infanoj.

Jam krepuskis, kiam la popolo atingis la pramon. Dvino jam preskaŭ tute glaciiĝis, la pramo tute kovriĝis per glacio, iam haltadis. Sur la eksteraj remparoj de la fortreso la malfavorata pafista estro Simono Borisoviĉ ordonis bruligi peĉajn torĉojn, la fortresaj kanonistoj staris ĉe la kanonoj kun bruligitaj meĉoj — prepariĝis al kanona pafsaluto. En la larĝe malfermita

pordego de la fortreso staris matrosoj kun nudaj sabroj, la fortresaj tamburoj batis «renkonton». Ĉi tie por mallonga tempo fariĝis konfuzo: Ĥagajo Pustovojtov per forto eltrenis antaŭen Rjabov-on, donis al li la kusenon, sur kiu malhele briletis la spado de la forpasinta Atanazio Petroviĉ.

La rudristo deĵetis la ĉapon, malvarma vento distaŭzis liajn orajn kun grizo harojn. Al li estis varmege, la ŝafan peltjakon li malbutonis, lia fortika brusto estis egalmezure leviĝanta. La tamburoj batis ne eksilentante. Kiam la procesio trairis la pordegon, sur la remparoj ekkantis klarionoj, solene eksonoris la sonorilo sur la fortresa preĝejo. Tute kadukiĝinta fortresa popeto Johano en la preĝeja pordo akceptis la kusenon, kisis la tenilon de la spado, ekportis pendigi ĝin sub la ikonoj.

Semisadov, starante sur la preĝeja perono, levis kaj mallevis torĉon.

La kanonistoj sur la remparoj ŝovis la meĉojn en la fuzeojn, fortega tondro skuis la murojn de la fortreso, en la preĝejo ekbalanciĝis fajretoj de kandeloj. La kanonistoj pafis trifoje, trifoje pulva flamo prilumis Dvinon, la glaciiĝintan pobon de «Krono», betulojn sur la Marka insulo.

Kiam ĉio finiĝis, Semisadov demandis Rjabov-on:

— Nu? Ĉu ni bone faris? Meĥonoŝin-on, dank' al Dio, ien la diablo forportis, alie li ne permesus kaj per kanonoj pafi, kaj la spadon en la preĝejo pendigi.

La rudristo respondis:

— Vi faris bone, nun necesas drinki rememore. Mi al Magrulo jam hieraŭ ordonis atendi gastojn.

En malfrua vespero Magrulo, riverencante, estis renkontanta

amikojn de forpasinta Atanazio Petroviĉ. Sur la tablo jam estis metita tablotuko, trans septo maljunulino estis bakanta blinojn, — neniom taŭgas funebra festeno sen blinoj. Renkontante homojn, la tavernisto diradis afable:

— Ni rememoru ĉiuj, kaj riĉa kaj malriĉa. La de sinjoro kapitano memoron ne respekti — al la diablo la animon vendi.

La gastoj subridadis:

— Vi ĝin jam antaŭ longe vendis.

— Vi kun la diablo jam antaŭ longe interfratiĝis!

— Kion ni manĝos — ni pagos, via regalo estas konata.

La unua rememoris Atanazion Petroviĉ-on helpanto de la kanona majstro Forĝisto, viro kun fulgokovrita vizaĝo kaj atenta rigardo de saĝaj brunaj okuloj. Li levis kruĉeton, diris severe:

— Do, Atanazio Petroviĉ, amiko bona! Ni servos ankaŭ en la transmondo al la bojaroj: ili en kaldronoj bolos, kaj ni brulŝtipojn metos.

Rjabov kaj Semisadov interrigardis: la vortoj estis strangaj. Sed la helpanto de Teodozo Forĝisto parolis tiel, kvazaŭ sciis ion pri Atanazio Petroviĉ, kion aliaj ne sciis. Li unuglute eltrinkis sian vodkon, kuntiris la malhelajn brovojn, enpensiĝis. Magrulo alportis al li bovlon da blinoj. Ĥagajo Pustovojtov ankoraŭ disverŝis vodkon al kruĉetoj. Oni rememoradis senhaste, ĉiu parolis, kiel li memoris Krikov-on, kia li estis homo, parolis kaj pri granda kaj pri malgranda, kaj pri gaja kaj pri malgaja. Ĉasisto, maljunulo Kuskov, ridetante, rememoris, kiel Atanazio spuris beston, kiel ĉasis urson. Dogansoldato Smirnoj rakontis, kiel sinjoro kapitan-leŭtenanto instruis

doganistojn serĉi kontrabandajn varojn, por ke ne plu eksterlandaj ŝipestroj priŝtelu la caran fiskon. Kaj ĉiuj subite kvazaŭ aŭdis la ruze mokan voĉon de Krikov, ĉiuj, kun ĝojo kaj fiero pri sia kampulo-dvinano, rememoris lian simplan aspekton, la gajan, oblikvan rigardon, la kuraĝan kaj saĝan obstinon en la dogana malfacila laboro.

Post Smirnoj parolis Rjabov, parolis obtuze, malrapide, kaj kvazaŭ alia Atanazio Petroviĉ aperis en la festeno: tiu, kiu, amare ofendita de maljustaj koruptuloj kaj potenculoj, ne cedis al la amara ofendo, sed ankoraŭ trovis en si fortojn honeste servi kiel kaporalo; tiu, kiu helpis en mizero al orfoj kaj ne nur per bona konsilo, sed ankaŭ per faro; tiu, kiu, iĝinte oficiro, ne forgesis siajn fratojn — kampulojn-fiŝistojn, ne forgesis soldatojn, ne forgesis, el kies li estas karno kaj el kies sango; tiu, kiu kaj en bona kaj en malbona tempo — ĉiam estis ekvilibra, kvieta, amika; tiu, kiu amis aŭdi kanton, amis festenon, laŭtan ardan konversacion...

Kiam la homoj estis disirantaj, la helpanto de kanonmajstro Forĝisto, subridante, demandis Rjabov-on:

— Ĉu ne komprenis vi, rudristo, kion mi tiam pri kaldronoj kaj bojaroj diris?

— Nun, ŝajne, komprenis! — respondis Rjabov.

— Ĉu vere komprenis?

— Komprenis, amiko. Kaj mi al vi tiel diros: forpasinta Atanazio Petroviĉ per tio estis bona, ke ne bruis multe. Li sciis la proverbon, kiel oni ĉe ni diras: mallaŭte esprimu — bojaroj proksime.

Jam fariĝis nokto, kiam Rjabov venis hejmen. Ivaĉjo,

laciĝinte dum la tago, disĵetinte la manojn kaj piedojn, dormis sur la larĝa benko. Taisja leviĝis renkonten al la edzo, brakumis lin, almetiĝis al la larĝa brusto.

— Ĉu vi preparis? — mallaŭte demandis li.

Taisja senvorte kapmontris noditan paketon, kuŝantan sur la benko ĉe la forno. Ŝi ne ploris, nur ŝia vizaĝo estis tre pala.

— Ĉu al vi frostas? — demandis la rudristo.

— Ŝajne, frostas! — kaŝinte la vizaĝon sur lia brusto, respondis ŝi.

Li silentis, ne sciante, kiel kvietigi ŝiajn suferojn, karese glatumante ŝian tremerantan ŝultron...

— Ĉu estas malvarme ekstere? — demandis Taisja.

— Frosto!

Ivaĉjo suspiris en dormo, ŝmacis per la lipoj, ekmoviĝis sur la benko.

Rjabov turnis la kapon al li, pli forte brakumis la edzinon.

— Ne timu, kara! — diris li mallaŭte. — Kiel alie fari? Ĉu estus bone alie?

Ŝi ne respondis.

— Ĉu ne iri? — tute mallaŭte, kvazaŭ elprovante ŝin, demandis la rudristo. — Ĉu fuĝi?

Taisja silentis.

— Vidu, kiel! — kun suspiro diris la rudristo. — Necesas, kara, iri. Laŭ la konscienco, alie la vivo ne estos vivo. Kiel do alie? Ivano elkreskos, riproĉos: vi, diros, kial ne bone tiam faris? Kial Ievlev-on kapitan-komodoron forlasis en malfeliĉo?

Kiel mi tiam finu mian vivon? Kaj al Maria Nikitiŝna, malfeliĉa, promesis mi. La vorto ja estas dirita...

Taisja retroklinis la kapon, avide ekrigardis en liajn verdajn okulojn, diris kun ĝemo:

— Kiom do eblas tiel, Ivaĉjo? Senfortiĝis mi, Ivaĉjo, elturmentiĝis tuta. La kapo malklariĝas, ne plu povas mi.

Li silentis, rigardis al ŝi desupre kun malgaja tenereco, kvazaŭ vere estis kulpa. Kaj ŝi parolis, sufokiĝante pro larmoj, riproĉante lin pri tio, ke la plej malfacilan, la plej teruran li ĉiam prenas sur siajn ŝultrojn, ĉiam faras mem: kaj en la monaĥejo li iris kontraŭ la frataro la unua, kaj kiam la ŝipojn en la ŝipkonstruejo li konstruis — al neniu riverencis, kaj sur Grumanto al li estis pli malbone, ol al la aliaj, kaj la ŝipon svedan li entreprenis surgrundigi, kaj en la malliberejon li nun iras por kruelaj suferoj...

— Nia filo sen patro kreskas, Ivaĉjo! — ploregante diris ŝi. — Mi ĉiam estas sola, vidvino ĉe viva edzo...

— Do — ĉu mi restu? — severe demandis Rjabov.

Ŝi ne respondis — subite kvietiĝinte, rigardante al li kun timo. Larmoj plu ruliĝis sur ŝiaj vangoj, sed ŝi ne plu ploris, atendis, mordinte la lipon.

— Jen, ne povas mi resti! — al si mem respondis li kaj prenis la paketon de la benko.

Taisja impetis al li, ŝirmis per si la pordon.

— Ĉesu, Tainjo! — kun severa tenereco diris li, flankenigante ŝin de la vojo. — Ĉesu, kara. Atendu. Ni ankoraŭ revidiĝos...

Kaj li fermis post si la pordon.

Taisja ekkriis, ŝiaj manoj lasis la pordofoston, je kiu ŝi tenis sin, la kruroj fleksiĝis. En silento ŝi klare aŭdis liajn firmajn nehastajn paŝojn sur knaranta neĝo, aŭdis, kiel li malfermis la barilpordeton. Poste ĉio silentiĝis.

Ĉapitro kvina

Prizono min nur honorigas,
Suferas mi pro prava far';
Kaj ĉu mi hontu pri l' ĉenar',
Se por Patrujo ĝi min ligas.

Rilejev

1. Bonan renkontiĝon, Silvestro Petroviĉ!

Sur knaranta frosta neĝo, svingante la pakon, senhaste, tra stratetoj li eliris al Dvino kaj haltis por longe. La ronda malvarma luno estis prilumanta per sia malafabla lumo englaciiĝantajn ŝipojn — ĝuste tiujn dek tri ŝipojn, kiuj restis sendifektaj post la sveda invado. Semisadov kondukis ilin por vintrado al la urbo, kaj nun Rjabov kun ĝojo kaj fiero rekonis konatajn konturojn, mastojn, jardojn, buspritojn. Jen «Paŭlo», kiun li kondukis tiam antaŭ la fremdlandaj ŝipoj. Jen alia ŝipo, sur kiu ili iradis en la maron kaj saviĝis en la Unaj kornoj. Jen ŝipo, kiu estis konstruita en Solombalo. Jen ankoraŭ «Sankta profetaĵo». Jen «Apostoloj»...

Mallarĝiginte la okulojn, suĉante mallongan pipon, kraĉante amaran salivon, li rigardis al la ŝipoj, al fajretoj, kiuj kuradis tie, aŭskultis etendajn sonojn de malnova pomora kanto, kiun kantis matrosoj, kaj, mirante, balancadis la kapon: estis strange, ke sur tiaj grandaj, por oceana iro, ŝipoj rusaj matrosoj kantas rusajn kantojn, estis nekutime vidi rusajn multtonelajn militajn ŝipojn — la rusan floton!

«Kaj kio? Ankaŭ mi mem tiujn ŝipojn konstruadis! —

pensis Rjabov. — Mi, kaj ankoraŭ Ivano Kononoviĉ, kaj Silentulo malaperinta, kaj samojedo Pajga, kaj Timoteo, — ĉu malmultaj ni estis. Konstruadis, kaj jen — elkonstruis. Nun jam nenion eblas diri, nun estas floto».

Li rememoris la svedajn militajn ŝipojn kaj «Kronon», kiun li surgrundigis kaj sur kiu oni mortigis Demĉjon; li suspiris, bedaŭris, ke Demĉjo ne vidos, kiel printempe, en plenan akvon ekiris la ŝipoj en la maron.

«Ne bruligis! — trankvile pensis Rjabov, aŭskultante la vastan liberan motivon, venantan de la granda ŝipo, — ne bruligis la svedaj latronoj! Jen, estis proksime, sed ne fariĝis. Kaj Semisadov kun Ievlev bone elpensis tiam forkonduki la floton. Se min la svedoj, kiel Metrion, mortigus, eble sukcesus ili, damnitaj, en la urbon penetri. Tiam ili, latronoj, forbruligus la ŝipojn...»

Li ankoraŭ staris iom, bedaŭrante pri la floto, kiun oni povus forbruligi, — multe ĝi kostis, pro ĝi mortis tiom da popolo. Poste li streĉis la zonon sur la peltjako kaj, kvazaŭ hastante por afero, ekiris laŭlonge de Dvino, preter la ŝipoj — al la arestejo.

Ĉi tie, malgraŭ la malfrua tempo, la rudristo trovis ian malklaran maltrankvilon kaj eĉ tumulton. Kancelariano Gusev, ekvidinte Rjabov-on, formovis de li siajn ŝvelintajn okuletojn kaj ŝajnigis, ke ne rimarkis la rudriston. Alia kancelariano, Abrosimov, ŝovante pugnojn al la vizaĝo de maljuna dragono, kriis al li, ke se la persono ne troviĝos, tiam post la dragono eĉ spuro ne restos. Samtie en angulo, kolere globigante la okulojn, estis larĝe skribanta en lumo de torditaj kandeloj pafista kolonelo Noble. Knarema nigra pordo de tempo al tempo frapadis, enlasante kaj ellasante matrosojn, rajdistojn, pafistojn

kaj dragonojn; sub fenestreto, fermita per feraj stangoj kun dornoj, ofte aŭdiĝadis ĉevala piedfrapado, henado, raŭka insultado de frostiĝintaj homoj.

Rjabov eksidis sur benkon, metis apud si la pakon, atendis. Poste demandis:

— Ĉu mi hejmen iru, aŭ kiel?

La kancelariano ne aŭdis la demandon. Apud la rudristo sur la benko estis ŝanĝanta botojn rajdisto kun gajaj viglaj okuloj. La rudristo demandis lin flustre:

— Ĉu ili ĉi tie ĉiuj freneziĝis?

La rajdisto levis la boton, korektis la krurumon, diris nedifinite:

— Ne mirinde!

— Kiun ili serĉas do?

— La komandanto fuĝis de la fortreso — sinjoro Meĥonoŝin. Kaj la tutan monon forportis...

Rjabov fajfis, en liaj okuloj ekbrulis gajaj fajretoj.

— Ĉu multe da mono?

— Mi ne kalkulis, sed oni diras, ke multe. La cara salajro, pago por la kontraktintoj. Eble, por vi kaj mi tiu mono por la tuta vivo sufiĉus... Nun serĉu la venton sur la kampo. Li havas bonan ĉevalon, li mem estas lerta, oron li nun havas... Kaj tio ankoraŭ ne estas ĉio, sed nur komenco...

— Kaj kio estas la fino?

— Nova vojevodo venas. Rĵevskij — tablestro.

— Kaj la nia?

— Ŝajne tute malsanas. Kiam pri Meĥonoŝin li eksciis — tuj falis. Eĉ ne kriis.

— Ĉu mortis?

— Kial mortis? Vivas. La langon perdis. Muĝas ŝajne kaj nur per fingro al si vokas. Komunion li akceptis.

Rjabov balancis la kapon:

— Jen kio...

La rajdisto ŝanĝis sian piedveston, piedfrapis la plankon per la botoj, diris gaje:

— Tiel estas pli bone, ja tute frostiĝis la piedoj. Oni ree sendas — serĉi.

Li foriris, Rjabov leviĝis de la benko, aliris al kancelariano Gusev. Tiu levis al li la ŝvelintajn okuletojn, kvazaŭ rememorante, kiu homo estas antaŭ li. Abrosimov, forturniĝinte, estis penseme maĉanta pirogon.

— Kiel do estos? — demandis la rudristo.

— Kio kiel estos?

— Ja tio! — kun moko respondis Rjabov. — Jen estas mi. Aŭdis, ke oni serĉis min. Mi venis. Konduku kien necesas, alie — mi la vojon hejmen ne forgesis...

— Vi al mi ne indiku! — diris Gusev.

Kaj li ekflustris kun Abrosimov. Kolonelo Noble plu skribis, same globigante la okulojn. Al la arestejo ankoraŭ alveturis dragonoj, ree frapis la pordo. Post malgranda tempo venis du gardistoj, en la mano de unu estis glima lanterno. Gusev kapmontris la rudriston. Silente ili elkondukis lin en la

vestiblon, ekkondukis laŭ ŝtupoj malsupren. El mallumo spiris malvarmo kaj ŝimo, kiel en la subteraĵo de la Nikola-Korela monaĥejo. Rjabov paŝis malrapide, palpserĉante per la piedo kurbajn ŝtupojn. Unu gardisto puŝis lin al la dorso, kriis:

— Vigle, ĉifonulo!

Rjabov turniĝis, kaptis la gardiston je la kolumo, alpremis al ŝtona muro, — tiu tuj ekraŭkis. La alia, turniĝante en la mallarĝa trairejo, penis bati Rjabov-on per halebardo al la kapo — ne sukcesis, ne povis turniĝi.

— Vi memoros ĉifonulon! — kun furiozo diris Rjabov. — Vi por eterne min memoros...

Kaj li ekiris pluen.

Sube estis ankoraŭ vestiblo kun fera krada pordo. Ŝlosisto en ŝirita peltjako estis trinkanta el ligna bovlo senkreman bluan lakton. La gardistoj, timigitaj, ekstaris malproksime.

— Kiu estas? — demandis la ŝlosisto per maljunula lispa voĉo.

— Kaj ĉu por vi ne estas tutegale? — respondis Rjabov.

La maljunulo fiksrigardis, aĥis:

— Ivano Sabateiĉ! Ho Dio ĉiopova, prenis vin tamen la antikristoj...

Rjabov silentis, ne rekonante. Poste rememoris — ili fiŝis iam kune.

— Trovis vi por vi lokon, avo, por maljuneco.

La ŝlosisto svingis la manon, eklamentis:

— Sola mi estas, Ivano Sabateiĉ, unusola en la mondo.

Manĝi-trinki ja necesas... Oj, malfeliĉo... Kiam vi min en tiu misfortuna jaro el la akvo elprenis, kiam mi restis sen la filo, kiam iĝis mizera... Kaj la kruroj ja doloras, la manoj tordiĝas, kaj da havaĵo entute estas nur hundino kaj katino...

Rjabov plu rigardis al la maljunulo, poste diris malmilde:

— Kial, avo, paroli. Se mi scius — ne elprenus el la akvo. Konduku kien necesas.

La maljunulo ekbruis per la seruro, petis mallaŭte:

— Pardonu pro Dio, Ivano Sabateiĉ. Mi servos rekompence.

— Do Dion petu! — diris Rjabov. — Por li estas pli oportune vin ĉiujn pardoni.

— Mi servos, Ivano Sabateiĉ...

— Vi servos ankaŭ sen pardono.

La maljunulo entiris la kalvan kapon en la ŝultrojn, malfermis la pezan pordon. Rjabov eniris, pririgardis la murojn, sur kiuj rampis akvo, ŝimon en anguloj, putrintajn trabojn. Fiksaŭskultis: en la malliberejo estis silento, kiel en tombo.

— Ievlev kie estas — Silvestro Petroviĉ? — demandis la rudristo.

— Jen — la kamero.

— Ĉu vi lin ĉi tie tenas — malsanan?

— Tamen estas pli seke. Kaj forno estas — ni hejtas.

— Al li min konduku!

— Malbona li estas. Nelonge vivos.

— Malfermu do.

La maljunulo ree ekbruis per la ŝlosiloj. La rudristo eniris la unua. La maljunulo malantaŭe levis super la kapo argilan poton, en kiu estis fulganta meĉo. Rjabov tuj ekvidis Ievlev-on: li sidis kontraŭ la pordo ĉe la muro, alpremiĝinte per la flanko al la forno.

— Venis! — per malforta, sed ĝoja voĉo diris Silvestro Petroviĉ. — Mi sciis, ke vi venos.

— Mi venis! — respondis la rudristo. — Mi venis, Silvestro Petroviĉ. Donacon al vi alportis. Saluton!

— Saluton! — plu ĝoje diris Ievlev. — Saluton, se vi ne ŝercas, je ĉiuj kvar ventoj. Ĉu mi ĝuste diras? Ĉu ne forgesis mi ankoraŭ en la malliberejo, kiel vi, pomoroj, salutas?

— Ne forgesis! — eksidante apud Ievlev kaj malnodante la pakon, diris Rjabov. — Tio estas afero simpla. Ricevu, sinjoro kapitan-komodoro, regalojn. Unue — tabakon, bonan. Fajroŝtonon, kaj fajrilon, kaj tindron. Mi la regalon por vi en mia maniero kolektis, kiel por Grumanto, kvazaŭ por vintrado: kio tie necesas, tio ankaŭ en malliberejo necesas. Jen pocioj, por ke ni ambaŭ ne ekskorbutu. Ŝmiraĵon avinjo Eŭdoĥa sendis, ni vin kuracos. Plue. Jen pipo — prifumita, bona. Nun de via edzino akceptu...

Li parolis, kaj kvazaŭ eĉ ne rigardis al Ievlev, dum dismetadis sur la lignotabula lito la regalojn. Silvestro Petroviĉ ekregis sin: rapide viŝis la malsekajn okulojn, komencis spiri pli glate, pli trankvile, ree ekridetis.

La lumilon Rjabov ordonis ne forporti. La ŝlosisto penis disputi, ke ne estas ordonite, sed la rudristo ĵetis al li tian rigardon, ke tiu riverencis kaj foriris.

— Kaj estas humide! — post la maljunulo kriis Rjabov. — Hejtu, olda pekulo!

Poste ili ambaŭ ekfumis la pipojn.

— Nu, kio do! — eldiris la rudristo, pririgardante la murojn de la kamero. — Ne gravas. Sur Grumanto ja multe pli malbone estis. Hodiaŭ ni ripozos, kaj ekde frua mateno ni okupiĝos pri afero — vi ne rekonos, Silvestro Petroviĉ, kia palaco ĉi tie estos...

Ievlev silentis. Liaj bluaj okuloj hele brilis en duonmallumo.

— Ni bone ekvivos! — estis diranta Rjabov. — Kaj dume aŭskultu, mi al vi novaĵojn rakontos.

Kaj li komencis rakonti pri princo Prozorovskij, pri fuĝinta leŭtenanto Meĥonoŝin kaj pri nova vojevodo Rĵevskij, kiu baldaŭ devis veni al Arĥangelsko.

— Unu Rĵevskij-on mi konis en pasintaj jaroj, — penseme prononcis Ievlev, elaŭskultinte la rakonton de la rudristo. — Bazilo estis lia nomo. Ĝuste li, verŝajne, estas...

— Kia viro?

Silvestro Petroviĉ respondis kun malplezuro:

— Princo Rĵevskij estas homo prudenta, ne agas senpripense, singardema, estas vojevodo ne unuan jaron...

— Ĉu bojaro?

— De bona deveno...

— Mi pensas, ne pli bona, ol la nuna?

— Vojevodo per cara ukazo estas enpostenigata! — preskaŭ kun kolero abrupte respondis Ievlev. — Ne nia estas afero pri li

paroli...

— Oj, nia! — malgaje subridinte, diris Rjabov. — Nia, Silvestro Petroviĉ. Ili nin enpelis pro nenio en malliberejon, kaj juĝu ilin ne ni. Ne, sinjoro kapitan-komodoro, ni!

— Ni vivos — ni vidos! — morne prononcis Ievlev.

— Tio estas alia afero: antaŭ tempo la kapon rompi ne indas. Ni, Silvestro Petroviĉ, manĝu iom, kaj dormi kuŝiĝu ĝis la mateno. Hodiaŭ mi havis klopodan tagon...

Li sternis sur la tabullito puran tukon, lerte tranĉis fumaĵitan boacaĵon; ruze palpebruminte, eltiris el la boto botelon da vodko, etendis al Ievlev, tiu, retroklininte la kapon, glutis. Rjabov diris karese:

— Bonan renkontiĝon, Silvestro Petroviĉ. Estu, kiel oni ĉe ni diras, — en la sekva jaro, kaj en la sama tempo, kaj kun la sama amiko, kaj ankoraŭ kun kuko.

Li drinkis, turnis la kapon, miris:

— Vidu, kiel ĝi eniras! Kiel birdo! Kvankam nun, post kiam mi el la tundro eliris, malebria mi ŝajne eĉ minuton ne estis...

Kaj li aldonis malgaje:

— Malbone, sed kion fari? Devas ja homo ripozi?

2. Vojevodo Rĵevskij

Kaj ekiris unu post alia malliberejaj, similaj unu al la alia tagoj...

Ie tie, supre, kie lumis la suno kaj tago diferencis de nokto, kaj vespero de mateno, — kancelarianoj Gusev kaj Abrosimov zorgis pri tio, ke ĉi tie, malsupre, en la humida kamero, pli

baldaŭ mortu la du malliberuloj. Ili mortos — kaj fino, ili mortos — tiam sola Prozorovskij kulpas pri ĉio, ili mortos — serĉu tiam la komencojn kaj finojn. Kaj la prizonaj gardistoj, kaj la gardistoj de la arestejo, kaj la kolera ino, kiu kuiris por la malliberuloj manĝon, kaj la senteruloj ĉe torturisto Pozdjunin, kaj Pozdjunin mem — ĉiuj sciis, kion deziras la kancelarianoj, sed timis pereigi la malliberulojn sen rekta ordono pri tio. Kaj la kancelarianoj ne kuraĝis doni tian ordonon sen konsento de vojevodo Prozorovskij, kiu kuŝis senmove, rigardis en la plafonon per malklaraj sensencaj okuloj kaj plende muĝadis.

Kaj la nova vojevodo Rĵevskij plu ne venadis.

Kaj la malliberuloj ne mortadis, kaj eĉ pli — malsana Ievlev komencis resaniĝi.

La kancelarianoj, konfuziĝinte, insultadis kaj timigadis la gardistojn per kruelaj punoj, sed la gardistoj nun ne tiel timis la kancelarianojn, kiel antaŭe, kaj plie aŭskultis Jegoron Rezenon, kiu vizitadis iliajn domojn kune kun la unukrura ferdekestro. Rezen estis malavara je regaloj kaj ofte ripetadis, ke venos caro Petro, kaj tiam ĉiuj ekscios, kiaj homoj estas la kapitan-komodoro kaj rudristo Rjabov. Kaj la ferdekestro kolere subridadis kaj promesadis al tiuj, kiuj estos kruelaj al la malliberuloj, tian punon, ke frostotremo trakuradis la dorsojn de la gardistoj. Krome, multaj sciis pri la heroaĵo de Rjabov dum la sveda invado, sciis ankaŭ pri tio, ke li mem venis en la malliberejon, por ne lasi en malfeliĉo Ievlev-on. Kaj ju pli longe, des pli multe da indulgoj estis faritaj al la du malliberuloj, kaj la kancelarianoj jam penis rimarki nenion kaj eĉ ne demandadis, ĉu vivaj estas Rjabov kun Ievlev aŭ mortis.

Tagoj iris unu post alia — monotonaj, sen ŝanĝoj — ĝis la

Kandelofesto[126] mem, kiam venis finfine la nova vojevodo. Onidiroj pri li estis negajaj. En la malliberejo tuj iĝis sciate, ke vojevodo Rĵevskij estas malfidema, parolas malmulte, respondojn al rektaj demandoj evitas, alveturigis al la ŝipkonstruejoj multajn fremdlandajn ŝipmajstrojn kaj sian tempon pasigas kun ili. Koĉnev-on kaj Ivanon Kononoviĉ-on li de la laboro forpelis, eĉ ne konversaciinte kun ili. Kun inĝeniero Jegoro Rezen Rĵevskij tuj forte kverelis kaj ne plu enlasas viziti. Diris oni ankaŭ — kaj tio estis la plej mirinda kaj malagrabla por la malliberuloj, — ke princo Bazilo jam kelkajn fojojn vizitis malsanan Prozorovskij-on, konsoladis lin, ke kalumnioj dispolviĝos kaj lia fidela servo al la Siro estos rekompencita, ke li mem, Rĵevskij, venis ĉi tien provizore, por tempo, kaj poste Aleksio Petroviĉ mem plu honeste kaj saĝe regos la Ĉedvinan regionon. Kaj li, princo Bazilo, forveturos al antaŭ longe promesita al li vojevodeco multe pli varma — al nutriĝo en Astraĥanon...

Aŭskultante la malgajajn novaĵojn, Rjabov morne subridadis:

— Jen vero! Mano kun ganto ĉiam amikas. Ne, Silvestro Petroviĉ, mi tiel rezonas: devas ni el ĉi tie kaŝe foriri. Tiun juston plu atendante, per la kapoj ni pagos...

Ievlev koleris:

— Ne stultumu! Mi de la cara juĝo ne fuĝos! Kaj ĉu decas al mi, kapitan-komodoro, kiel latrono kaŝe fuĝi...

En la tago de sankta martiro Blazio[127] malfrue nokte la

---

126 La 2-an de februaro laŭ la Julia kalendaro, en la 18-a jarcento respondis al la 13-a de februaro laŭ la Gregoria kalendaro *(trad.)*.

127 La 11-an de februaro laŭ la Julia kalendaro, en la 18-a jarcento — la 22-

ŝlosisto vekis Ievlev-on kaj Rjabov-on kaj per tremanta flustro diris al ili, ke Rĵevskij tuj estos en la arestejo por konversacio kun ili. La kancelarianoj jam venis kaj atendas. Silvestro Petroviĉ, apogante sin sur lambastono, kun peno leviĝis laŭ la krutaj glitaj ŝtupoj kaj tute konsumita malleviĝis sur benkon. La rudristo, ne atendante de la nova vojevodo-bojaro ion bonan, morne staris ĉe la forno.

Ili atendis longe.

Finfine la frostiĝinta pordo malfermiĝis, la gardistoj levis halebardojn. Rĵevskij, en mallonga jako el tanita ŝaffelo, larĝe paŝante, eniris en la domon, per malvarmuma voĉo de la sojlo demandis Ievlev-on:

— Kial vi sidaĉas? Ĉu al asembleo oni vin invitis?

Ievlev, ne ekstarante, respondis:

— Ĉu vi ne rekonis min, Bazilo Andrejeviĉ?

La vojevodo, penante ne renkonti rigardon de Ievlev, subridinte per sola buŝo, paŭzis, poste klare prononcis:

— Jen kien vi celas? Ne, hodiaŭ mi ne rekonas. Kaj ne por tio nin la Siro kiel vojevodoj enpostenigas, ke ni, fidelaj liaj servantoj, iujn aliajn, forgesintajn sian honoron, kiel malnovajn amikojn rekonu...

— Amikoj ja mi kaj vi, princo, ne estis, tion vi mensogis! — nelaŭte, sed forte prononcis Ievlev. — Kaj koncerne la honoron, do se vi, ne atendinte juĝon, al mi ankoraŭ foje tion diros — mi la lambastonon ne domaĝos, kripligos vin! Je mia flota rango min ankoraŭ neniu senigis, pri tio memoru...

---

an de februaro laŭ la Gregoria *(trad.)*.

Princo Bazilo ree subridis kun aspekto de homo, kiu multe scias, kriis:

— Kiu estas tie! Fajron!

Gusev, tremante pro la ricevita honoro, donis kandelon. Rĵevskij ekfumis pipon; eligante fumon, li komencis foliumi paperojn. Singarde spiris ĉe la sojlo la gardistoj, la kancelarianoj senmove staris post la dorso de la vojevodo. Ievlev pensis, mallevinte la kapon. Rjabov, mallarĝiginte la okulojn, rigardis flanken — pro fiero, por ke la nova vojevodo ne pensu, ke ĉi tie oni lin tre timas kaj atendas de li decidon. Rĵevskij legis longe, de tempo al tempo almontrante per la fingro al folio, incitite demandadis la kancelarianojn:

— Kio estas ĉi tie? Pri kio? Tuj diru, al mi mankas tempo...

La kancelarianoj, rigidiĝintaj pro timo, konfuzis, diradis absurdaĵojn, interrompadis unu la alian. Paperoj pri la afero de Ievlev estis tre multaj — la kancelarianoj manĝis sian panon ne sen laboro, kaj tio, kion ili diradis al la vojevodo, estis tiom absurda kaj sensenca, tiom senmezure stulta, ke Rjabov laŭte kun angoro suspiris.

Rĵevskij levis sian rigardon al li, la rudristo kun trankvila kolero ekrigardis al la princo.

— Aliru! — ordonis Rĵevskij.

La rudristo aliris je paŝo pli proksime.

— Ĉu estas vi Rjabov Ivaĉjo? — demandis Rĵevskij orgojle.

— Estas mi Rjabov, tamen ne Ivaĉjo, sed Ivano Sabateiĉ! — kolere kaj morne respondis la rudristo. — Ivaĉjo oni min nomadis antaŭ dudek jaroj, aŭ eĉ pli. Nun eĉ drinkuloj,

fordrinkintaj ĉion en drinkejo, eĉ tiuj tiel ne nomas...

— Jen, kia! — retrokliniĝinte sur la benko, diris la vojevodo.

— Tia, kia estas!

— Ĉu rudristo?

— Estis rudristo, iĝis malliberulo.

— Ankoraŭ mortinto pro viaj bonaj aferoj vi iĝos! — promesis Rĵevskij. — Atendas ja vin maŝo!

— Tion ankaŭ vi, vojevodo, ne evitos! — kun la sama trankvila kaj glata kolero diris Rjabov. — Morto ankaŭ vin forprenos. Pocion kontraŭ tombo eĉ por princoj oni ne eltrovis...

La kancelarianoj oĥis pro la terura arogantaĵo, la gardistoj metis la halebardojn en la angulon, prepariĝante tordi la brakojn de la rudristo, sed Rĵevskij kvazaŭ tute nenion rimarkis, nur apenaŭ paliĝis. En la domo ree estiĝis silento. Silvestro Petroviĉ levis la kapon, ekrigardis al la larĝa dorso, al la larĝaj fieraj ŝultroj de Rjabov: la rudristo staris senmove, firme...

— Ne kvieta vi, kiel mi vidas, naskiĝis! — rimarkis Rĵevskij.

— Rusujo — ne karasujo, perĉoj pli multas!

— Ĉu vi vin opinias perĉo?

— Kial perĉo? Mi estas homo!

Princo Bazilo eksidis rekte, apogiĝis per la manoj al la tablo. Li sentis sin ĝene antaŭ tiu sentima kampulo, li ĉiam iel ne

povis diveni — ĉu li ridetu orgojle, ĉu li simple ordonu bati per bastonoj la rudriston, ĉu li ekstaru kaj batu lin al la dentoj. Per obtuza voĉo li demandis:

— Ĉu vi tiel la tutan vivon travivis, kiel perĉo?

— Ne travivis, travivos!

— Ne laŭ rango vi paŝas, tro larĝe...

— Gruo kamplimojn ne scias, tra ili paŝas!

Rĵevskij pensis iom, turnante la lipharojn, demandis kun malestimo:

— Kiel do vin, jenan gruon, la svedoj subaĉetis?

Rjabov sufokiĝis, liaj manoj spasme kunpremiĝis en pugnojn, sed la gardistoj de malantaŭe surfalis lin. Gusev batis sub la genuojn, la rudristo glitis, falis dorsen. Dum lin tenis la gardistoj kun la kancelarianoj, el trans la septo elkuris por helpo soldatoj kun la senteruloj de Pozdjunin.

— Forigu lin el ĉi tie! — laŭte, pli laŭte, ol decus al vojevodo, diris Rĵevskij. — For!

La rudriston oni eltrenis. Rĵevskij longe sidis silente, poste ordonis foriri al ĉiuj, krom Ievlev, mem riglis la pordon, ekparolis, penante esti pli trankvila:

— Vi antaŭ nelonge demandis — ĉu mi vin ne rekonas, Ievlev? Do, mi rekonis, kiel mi povas ne rekoni, memoras mi kaj la lagon kaj aliajn niajn diversajn okazojn...

— Pri okazoj vi estas kapabla, princo! En tiu juna aĝo vi denuncadis, kaj nun, vidu, en malliberejojn homojn tiras...

Rĵevskij lace forsvingis:

— Lasu, Silvestro! Kial babili bagatelojn. Estis, multo estis, sed iĝis tiel, ke mi estas multe pli prava ol vi ĉiuj nun, post paso de tempo. Mem juĝu, kia popolo estas en la cara servo: unu estas ŝtelisto, alia por li helpanto, tria koruptulo, kvara spiono, kvina kaj koruptulo, kaj ŝtelisto, kaj spiono. Mi ekde la juna aĝo al neniu fidis, ĉiujn suspektadis, al neniu estis amiko. Kaj prave mi faris, prave...

— Ja pli prave ne eblas!

— Atendu, kial vane kvereli. Vi nun estas malliberulo, mi — vojevodo. Se okazus, ke vi estus sur mia loko, ĉu vi min kisus?

— Ne, princo Bazilo, sed ankaŭ Prozorovskij-on kun konsoloj mi ne vizitadus...

Rĵevskij ĵetis rapidan, akran rigardon al Ievlev, nenature subridis:

— Kaj pri tio vi ĉi tie scias?

Silvestro Petroviĉ kapjesis:

— Kaj pri tio ni scias.

La vojevodo kuntiris la brovojn, silentis iom, demandis, foliumante la paperojn:

— Ĉu estis sendita de vi petskribo al Voroneĵo, por Apraksin, Ievlev?

— De mi? — miris Silvestro Petroviĉ. — Kia petskribo?

— Ĉu vi vere ne scias? Kvazaŭ ne vi sendis tien fuĝintan servutulon de princo Zubov!

Ievlev rigardis kun tia neŝajniga miro, ke Rĵevskij nur

ŝultrolevis kaj ekparolis pli simple, ne kiel juĝisto, sed kiel konversacianto:

— Ĉi servutulo en la pasinta tempo levis la manon kontraŭ sia bojaro, poste al Volgo foriris, serĉi akiron, kiel ili, latronoj, pri la rabado diras. De Volgo ŝajne li ĉi tien, al Dvino, venis, kaj kiam lin nun en Voroneĵo Zubov ordonis kapti, li duan fojon de li fuĝis, kaj ankoraŭ murdon faris kaj unu servutulon kun si en la stepon forkondukis. Ĉi fuĝulon, alnomatan Silentulo, ĉi tie oni konas, li ankaŭ ĉi tie malklarigadis akvon, al ribelo instigis kaj firme amikis kun la malica malamiko de la Siro kapitano Krikov...

— Krikov! — ekkriis Ievlev.

— Do, lin vi konas, ja mi pensis, ke ankaŭ pri ĉi homo vi miros.

— Krikov Atanazio Petroviĉ pereis glore, kaj lia honesta nomo...

Rĵevskij malsimpatie sulkiĝis:

— Sufiĉas, Ievlev! Via Krikov kun tiu sama Silentulo ribeligajn foliojn legadis, kiujn ankaŭ vi konas. Kial vane mensogi! Ĉu ne scias vi, kiaj sekretaj konversacioj en la domo de Krikov okazadis? Aŭ vi ne havis okazon tie sidi? Jen Jegoro Pustovojtov depozicias, ke pri multo vi kun Krikov inter kvar okuloj parolis, — pri kio? Ĉu eĉ unu fojon Azovo ne estis menciita, kie princo Prozorovskij ŝtatajn malamikojn kaptadis? Ĉu pri tio, ke de Prozorovskij servutulojn lokaj latronoj kiel rabobirdo kokinojn mortigas, ne konversaciis vi? Ĉu ne pensis vi, Ievlev, eĉ unu fojon, ke via fama Krikov estas latrono, de nia Siro perfidulo, ke...

— Princo Bazilo! — severe interrompis la vojevodon Silvestro Petroviĉ. — Vi pensu, kion vi deziras, sed por mi ĉi vortojn aŭskulti estas abomene. Se vi por afero min ĉi tien vokis, do diru la aferon. Ĉu vi vere mem kredas tion, pri kio vi nun diras? Ĉu la ebria ŝtelisto, nenifarulo kaj stultulo, monstro Prozorovskij tiel vin trompis? Vi la veron serĉu...

— Veron? — kriis subite Rĵevskij. — Veron? Sed kie ĝi estas, la vero? Jen pri vi kiom estas skribite — monto, ĉu vi vidas? Kaj en la angla, kaj en la germana, kaj en la Venecia! Kie ĝi estas, la vero, en kiu folio? Kiel via rudristo mi diros: mi estas homo. Mi kredus al vi, sed en la folioj estas skribite — ne kredu! Mi liberigus vin el ĉi malliberejo, sed ankaŭ mia propra kapo, mi pensas, estas kara, min oni demandos, kaj nun en Rusio ne per vorto oni demandas, pli ofte per pendigilo, kaj rado, kaj per ekzekuta ŝtipo. Ĉie oni malsamon flustras. El Moskvo oni homojn sendas, ke kvazaŭ Prozorovskij pri nenio kulpas, estas kalumniita, kaj eksigita nur provizore...

Silvestro Petroviĉ levis rigardon, demandis bruske:

— Por kio ĉi lamenta konversacio? Por ke mi, aŭskultante vin, ekploru pri viaj malfeliĉoj? Ne, mi ne ploros! Mi vin, amiko kara, ekde Perejaslavlo memoras, kia vi estas saĝulo! La veron li ne povas trovi. Sed ĉu vi ĝin serĉas? Por kio ne trovis vi la plej unua devo mian historion malĝojan esplori, kiam vi ĉi tien venis? Ĉu tiel estas pli trankvile? Por ke iel alie, hazarde, la fortuno ne turniĝu. Por ne erari antaŭ la Siro? Vi ankoraŭ ekmalsanu, alie oni vin tutegale demandos...

Rĵevskij frapis per la polmo al la tablo, kriis:

— Silentu!

— Kaj se mi silentu, tiam ankaŭ vi ne plendu pri via sorto, — abrupte diris Ievlev. — Plu eĉ ne indas paroli...

Rĵevskij revenis al la tablo, ree komencis foliumi la paperojn, kvazaŭ ĝuste en ili estis la vero. En la estiĝinta silento iĝis aŭdeble, kiel trans la pordo kvazaŭ longe starintaj ĉevaloj paŝas surloke la gardistoj, kiel ekstere, trans la glimaj, kradaj fenestroj oni kriadas «atentu!». En la frosta nokta aero frapadis klakiloj, sur la sonorilejo de la preĝejo de Sankta Paraskeva oni sonorigadis horojn. Malrapide estis pasanta la nokto, Rĵevskij plu legadis. Antaŭ mateno Ievlev ĵetis rigardon al la princo, pensis: «Malforta homo! Tute malforta! Timas li eĉ pensi, des pli fari».

— Kiu estas Ripley? — demandis la vojevodo.

— Spiono kaj kaŝobservisto! — abrupte respondis Ievlev.

— Loftus kiu estas?

— De la sveda reĝo Karolo spiono!

— Georgo Lebanius?

— De Loftus la dekstra brako.

Rĵevskij retrokliniĝis sur la benko, rideris, interesiĝis:

— Tiele eĉ forpasinta Lefort...

— Poste oni vidos, — morne interrompis Ievlev. — Nepoj ekscios...

— Kion, tamen, ili ekscios? — streĉiĝinte, demandis la vojevodo.

Silvestro Petroviĉ komencis rakonti pri Azovo, kiel Lefort faris sapeon sub skansoj, pro kio pereis pli ol tricent homoj, sed

tuj komprenis, ke pri tio paroli ne indas, kaj svingis la manon, abrupte interrompinte sin...

— Same ankaŭ la ribeluloj pafistoj en Moskvo babilis, — seke diris la vojevodo. — Vere tiel: herezulo Fraĉjo Lefort. Ne koleru, Ievlev, sed ĉio ĉi — de via Krikov, — ĝuste diras princo Prozorovskij...

— Prozorovskij-on vi ekuzis! — amare subridis Silvestro Petroviĉ. — Certe, ĝisatendos mi la veron...

La vojevodo foliumis ankoraŭ, oscedis, tiris sin. Trans la glimaj fenestroj estis malrapide rozkoloriĝanta frosta aŭroro.

— Ĉi tie per unu fojo ne eblas solvi! — diris li, kunmetante la foliojn. — Ĉi tie, Ievlev, ne unu kaj ne du tagoj necesas. Kaj ankoraŭ mi pensas: ne rajtas mi pri ĉi afero decidi...

— Kiu do rajtas?

— Decidi pri vi nur sola Siro povas — Petro Aleksejeviĉ...

— Kaj mi pensis, ke vi! — kun moko en la voĉo prononcis Ievlev. — Ĉiam mi atendis: legos vi la foliojn, kaj liberigos. Sed ne!

Li kapjesis, leviĝis, ekiris, peze apogiĝante sur la lambastono. Rĵevskij vokis lin:

— Kun la kruro kio estas?

— Ja mi, vidu, princo Bazilo, en batalo estis, do tie oni pafadis...

— Kiel do la rudristo sendifekta eliris?

Silvestro Petroviĉ returniĝis apud la pordo, sulkiĝante pro doloro en la kruro, diris:

— Dek sep vundoj estas sur li — tranĉilaj, sabraj, kuglaj. Viva loko mankas. Kaj ne vi pri li ridu, princo Bazilo...

Lia vizaĝo tordiĝis pro furiozo, per ŝiriĝanta voĉo li kriis:

— Kuraĝan batalanton, veran kaj glorindan heroon, sur kiaj Rusujo staras, pro kalumnioj de fremdlandanoj kaj de maliculo Prozorovskij, oni malliberigis en prizono, por ĝojo de torturistoj! Ĉu vi ne freneziĝis, Rĵevskij? Tempo pasos, la vero supren leviĝos, ne okazis ankoraŭ en la mondo, ke post paso de jaroj la vero perdiĝus, ĉion ekscios la homoj, nu, kaj kiam ekscios — kia vi tiam aspektos? Mi ne al konscienco via alparolas, vi ĝin ne konas, mi — al la ruzeco alparolas. Stulte, stulte, princo Bazilo, vi faras, do, diablo kun vi, kial riverenci al vi, pri kio vin peti...

Li turniĝis al la pordo; forgesinte pri la riglilo, li tiris la krampon, faligis la lambastonon, kontuzis la kruron kaj kun mallonga ĝemo alpremiĝis al la traba muro de la arestejo. Rĵevskij kaptis lin je la ŝultroj, levis la lambastonon. Silvestro Petroviĉ spiris malglate, malvarma ŝvito ruliĝis sur lia griza vizaĝo.

Malferminte la pordon, la vojevodo kriis al la kancelarianoj. Gusev kaj Abrosimov eniris kun riverencoj, tute timigitaj, nenion komprenantaj: ili subaŭskultis, kiel malliberulo Ievlev kriis al vojevodo princo Rĵevskij. Princo Bazilo ekparolis severe:

— Sinjoron Ievlev-on teni en la malliberejo, firme memorante, ke li estas kapitan-komodoro kaj je tiu sia rango de neniu estas senigita. Hodiaŭ al li estos sendita kuracisto, kaj tiu kuracisto venados al li kiel deziros. En manĝo kaj ĉio cetera ĉi malliberuloj rifuzon ne aŭdu. Rudriston Rjabov-on teni kune

kun sinjoro kapitan-komodoro, sed tamen, kiel ili mem deziros...

La kancelarianoj riverencadis unue nur al la vojevodo, poste eĉ pli forte — al Silvestro Petroviĉ. Post la malfermita pordo avide aŭskultis la gardistoj: aperis al la malliberuloj indulgo, — verŝajne, pravis inĝeniero Rezen kaj la unukrura gaja ferdekestro. Ho, malfacilas cara servo — kiel scii, kiel diveni, kio morgaŭ okazos.

Silvestron Petroviĉ-on oni forkondukis, subtenante ĉe la kubutoj, la malliberulo tuj iĝis persono. Rĵevskij ree malleviĝis sur la benkon, kolere komencis foliumi la paperojn. La kancelarianoj snufadis malantaŭ la dorso, prepariĝante klarigi, se demandos la vojevodo, nun jam favore al la kapitan-komodoro. Jam tute tagiĝis, matenaj sunradioj estis penetrantaj en la fenestrojn. Rĵevskij turniĝis al la kancelarianoj, demandis per laca voĉo:

— Ĉu kulpas Ievlev pri ĉi malicaĵoj kaj avaraĵoj aŭ ne kulpas?

Kancelariano Gusev alpremis la polmojn al la brusto, ekkriis:

— Vojevodo-princo, se turni tutan lian aferon tiel, ke ĝi eliru al senkulpeco...

Kancelariano Abrosimov puŝis sian kamaradon per la akra kubuto, interrompis:

— Fremdlandanoj, princo, estas tiaj, ke povas nesciate kion skribi, sed nur...

— Ĉu kulpas li pri perfido? — kriis per furioza voĉo Rĵevskij. — Kulpas aŭ ne? Kial vi staras kiel fostoj? Ĉu vi

estas kancelarianoj aŭ ŝlemiloj?

Gusev kaj Abrosimov alpremiĝis al la muro, atendis de la princo batadon. Rĵevskij trairis la domon, ordonis kaŝi la foliojn, surmetis la ĉapon, forirante demandis Abrosimov-on:

— Nu? Ĉu kulpas aŭ ne?

Tiu ŝrumpis tuta kaj respondis rapide:

— Tion ne ni sciu, princo-voejvodo. Tion scias Dio kaj granda Siro.

3. Mallibereja vivo

Kaj morgaŭ, kaj post semajno, kaj post monato vojevodo Bazilo Andrejeviĉ Rĵevskij la arestejon — ĉu pro manko de tempo aŭ pro alia kaŭzo — ne vizitis, kaj pri la malliberuloj oni kvazaŭ denove forgesis. La mallibereja vivo revenis al la rutina vojo, kaj ree ekiris samaj, similaj unu al la alia tagoj...

La unua en la kamero ordinare vekiĝadis Rjabov; dolĉe kaj longe oscedadis, kun krakado tiradis sin, demandadis Ievlev-on senzorge — kiel tiu dormis. Silvestro Petroviĉ, kiun turmentis sendormeco kaj pezaj pensoj, respondadis kolere, ke dormis li plej malbone...

— Kiele! — miradis Rjabov. — Kaj por mi — nenio! Venis dormo sen vorto kaj faligis per forto...

Kuŝante, ili dum ioma tempo konversaciadis en mallumo, Ievlev — kolere, Rjabov — kun sia ĉiama trankvileco kaj bonanimeco. Ekstari Silvestro Petroviĉ ne deziris, sed li sciis la kruelan nepetegeblecon de la rudristo en ĉio, kio koncernis malliberejan tagordon, kaj kvankam sendezire, sed tamen

leviĝadis, iom post iom komencante senti ion similan al plezuro pro tio, kiel li en ĉio subiĝas al la volo de Rjabov. Kaj tiu jam estis frapanta per la botoj al la pordo, postulante fajron de la ŝlosisto kaj interinsultante kun gardisto, ne komprenanta, por kio la malliberuloj leviĝas antaŭaŭrore.

Tuj kiam la obeema maljuna, kalva ŝlosisto alportadis lumilon, Rjabov komencadis prepari sian herban salaton, kiu sur Grumanto savis lin de skorbuto. Li alverŝadis al ĝi oleon, haketadis cepon, ajlon, salitan fiŝon kaj metadis la bovlon sur la tablon, ĵetante ruzajn rigardojn al Ievlev, kiu ridinde angoris en atendo de terura matenmanĝo. Ili altrinkadis la salaton per malvarmigita konifera infuzaĵo.

— Bona estas la diabla salato! — diradis Rjabov, ŝovante lignan breĉetitan kuleron sur la fundon de la bovlo. — Ĝi, Silvestro Petroviĉ, sen kutimo eble al vaporkuirita basto similas, sed kiam oni kutimiĝas — estas bonega! Vi per kvaso ja altrinku, la kvaso estas bona, ŝaŭma, nur ne ebriiĝu...

Ievlev retenadis sin, por ne insulti, ne frapi per la pugno la tabloplaton. Al la rudristo li penis ne rigardi, manĝis mallevinte la kapon. Sed foje li ne retenis sin, frapis per la polmo la tablon, kriis:

— Sufiĉas stultumi! Unu kaj samo, ĉiun tagon la samo...

Rjabov respondis trankvile:

— Malliberejo, Silvestro Petroviĉ, nenion eblas fari. Ne min mem ja mi gajigas, vin — malsanan, nekutiman. Mi ja estas ne vi, inter homoj vivis, la mondon vidis: hakilon sur piedon surmetadis, per tenilo zoniĝadis. Kaj la tablon ne batu — estas malbone...

Li glatumis per la mano la tablon, klarigis:

— Avino Eŭdoĥa jam antaŭ longe min instruis: ne batu, Ivaĉjo, al tablo, tablo estas polmo de Dio, de tablo ni panon kaj fiŝon manĝas. Ĉu de Dio aŭ ne — mi ne scias, sed estis dirite bone...

Ievlev impetis de la loko, kuŝiĝis sur la tabulliton, forturniĝis al la eterne humida muro. Li deziris respondi al la rudristo per io tia, ke li eksilentu por longe, sed vortoj ne aperis, kaj la kolero malaperis.

Kiam venis tempo tagmanĝi, la rudristo, kvazaŭ nenio okazus, metis sur la tablon bovlon kun supo, tranĉis panon, vokis:

— Silvestro Petroviĉ, he, Silvestro Petroviĉ...

Ievlev abrupte eksidis al la tablo, prenis kuleron, ne rigardante al la rudristo, petis:

— Pardonu, Ivano Sabateiĉ! Pardonu, amiko... Ofendis mi vin hodiaŭ. Ne intencis...

Rjabov respondis trankvile:

— Se vi ofendus! La malsano ofendis, kaj ĝin ne eblas riproĉi.

Post la tagmanĝo en la mallibereja subtera vestiblo subite ekbruis voĉoj, aŭdiĝis laŭta rido, gaja insultado — venis inĝeniero Jegoro Rezen kun letereto de la vojevodo, ke oni ne obstaklu lin en vizitado de la malliberuloj.

— Mi nun estas medicinisto! — diris Rezen. — Kaj kial mi ne estu medicinisto? Mi kuracos viajn animojn, ĉu ne?

Elprenante el la poŝoj manĝaĵojn, tabakon, kompresojn,

ungventojn, dekoktaĵojn, saltante de la rusa al la germana, Rezen rakontis novaĵojn pri vojevodo Rĵevskij, pri la ŝipkonstruejoj, pri la fortreso; poste li subite frapis sin per la polmo al la frunto, ekkriis:

— Viktorio, kapitan-komodoro, bonega viktorio. Sinjoro Ŝeremetev kun granda armeo ekiris en Livonio al svedo Schlippenbach kaj la dudek naŭan de decembro ĉe bieno Errastfer plene frakasis la svedan armeon. Tri mil svedoj estis mortigitaj, tricent kvindek homoj estis kaptitaj. Feldmarŝalo sinjoro Ŝeremetev per tio siajn aferojn ne finis. Estas kolektata granda armeo — plue bati la svedon.

Silvestro Petroviĉ, paliĝinte, aŭskultis, tradukis al Rjabov. Tiu per tranĉileto estis rabotanta bastonon, por ripari la triviĝintan lambastonon de Ievlev. Rezen rakontis, kiel Menŝikov veturigis al la venkinto ordenon de Sankta Andreo, caran portreton en briliantoj, ukazon pri promocio al general-feldmarŝalo; rakontis, kiel en Moskvo en tiuj tagoj estis farataj dankaj diservoj, tondris kanonoj, kiel sur la Kremlaj turoj kaj muroj flirtis deprenitaj de la svedoj standardoj.

— Por iu — sonĝo, por iu — realo, por iu — trezoro, por iu — nenio! — diris Rjabov. — Sed ne gravas, Silvestro Petroviĉ, ne por ni mem ni penis.

Kaj li demandis:

— Kaj kio estas tiu Sankta Andreo?

Silvestro Petroviĉ klarigis, kiaj ekzistas ordenoj. Rjabov elaŭskultis sen speciala intereso, eĉ ne diris sian ordinaran «jen kiele!» Poste nur subridis, plendis:

— Se oni donus tian signon, ke kun ĝi en malliberejon oni

ne trenus. Pendas sur vi plateto kaj signifas: «Ĉi viron laŭ ies ajn volo per bastonoj ne bati, sur pendigilon ne levi, la naztruojn per tenajlo ne ŝiri!»

Rezen komprenis, frapis la rudriston al la ŝultro, oportune eksidinte sur la tabulligno, komencis rakonti plu. Laŭ liaj vortoj estis, ke vojevodo Rĵevskij estas konvinkita pri senkulpeco de Silvestro Petroviĉ kaj Rjabov, sed pro malkuraĝeco silentas kaj esperas, ke la tuta afero solviĝos sen li...

— Tio estas vero! — kapjesis Ievlev. — Li estas elstara malkuraĝulo...

La inĝeniero rakontis ankoraŭ, ke la meritoj de Prozorovskij en Azovo, kiel li tie kaptadis ribelulojn, ne estas forgesitaj, kaj nur tial la kapitan-komodoro kaj la rudristo ankoraŭ ne estas liberigitaj. La eksa princo-voejvodo estas opiniata merita grandsinjoro kaj fidela cara servanto — pro tio estas la tuta prokrasto. Sed ĉio iras al bono: antaŭ nelonge, en proksimaj tagoj, Maria-n Nikitiŝna-n vizitis kolonelo Vilhelmo Noble — kun grandega respekto sciigis al ŝi, ke printempe oni atendas en Arĥangelsko iun personon, kaj tiu persono venos nepre. Ĝuste ĉi persono decidos la sorton de Prozorovskij, kaj kun li ankaŭ de la malliberuloj, ĉar aparte pri tio eĉ ne estas pri kio pensi.

Ili silentis iom. Silvestro Petroviĉ penseme alpremadis per la fingro la tabakon en la pipo. Rjabov leviĝis, prenis de li la lambastonon, komencis alfiksi sian bastonon.

— Printempo, probable, estas ekstere? — demandis Ievlev.

— Jes, jam estas varme! — respondis Rezen. — Do, kapitan-komodoro, mi kuracu vin...

Li pririgardis la kruron de Ievlev, balancis la kapon, pansis. Ili ree ekparolis pri la fortreso, pri la ŝipoj, pri la floto. La inĝeniero rakontis, ke estas onidiro, kvazaŭ la svedoj ne forlasis sian ideon bruligi Arĥangelskon kaj intencas veni ĉi tien ree, ke la fortreson estas ordonite tutan vesti per ŝtono, meti ankoraŭ bateriojn, ke en la urbon venas ankoraŭ trupoj.

Foriris Rezen malfrue, kaj post lia foriro Silvestro Petroviĉ tute malgajiĝis. La rudristo aranĝis la lambastonon, mem provis ĝin — ĉu estas oportuna, paŝis tra la kamero, lamante, el angulo en angulon, diris gaje:

— Bonas la bastono, kun tia eĉ al vojevodo ne estas hontinde iri. Nu do, Silvestro Petroviĉ, provu...

Ievlev paŝis kun la lambastono, Rjabov laŭdis:

— Je Dio, irmaniero via estas nun alia!

Matene, kiam la avo-ŝlosisto estis hejtanta la fornon en la kamero, Ievlev subite demandis:

— Mi hodiaŭ nokte, Ivano Sabateiĉ, jen kion pensis: de kie vi sur Grumanto brullignon prenis? Jen kiom vi vivis tie, kaj pri malvarmo vi ne plendis. Ĉu tiom da ligno akvo alpelis?

— Kial ligno, — diris Rjabov. — Ni per ŝtono hejtis.

— Kia tia ŝtono?

— Metrio forpasinta trovis. Rojo tie glaciiĝis, li ĝin skrapis ial kaj foje alportis ŝtonon: nigran, perokule kiel glimo. Ni pensis, eble, tiu ŝtono estas fera, eble, el ĝi erco eliros? Kaj ni feron tre multe bezonis. Ni metis ĝin en la fornon por fandi, sed ĝi ekbrulis mem. Kaj tiel arde!

Ievlev levetiĝis sur la kubuto, demandis:

— Kaj ĉu multe tie estas da tia ŝtono?

— Multe. Metrio al rojoj iradis kun bastoneto, ĉiam frapadis. Poste sur felo per kudrilo brodis — kvazaŭ mapon pri la ŝtono.

— Kie do estas ĉi felo?

— Ja Dio ĝin scias, Silvestro Petroviĉ...

Ili ree manĝis la salaton, altrinkante ĝin per konifera infuzaĵo, ankoraŭ parolis pri Grumanto, kiel kaptiĝas en ties lagoj fiŝo salvelino, kiaj tie kreskas betuloj kaj salikoj...

— Ho, kiel malgrandaj! — rakontis Rjabov. — Duonarŝino, ne pli. Kaj en vento se kuŝiĝi apud tia betulo — ĝi bruas, je Dio bruas. Kiel la vera. Nu, tio estas tia afero, prefere ne aŭskulti. Tuj sopiro prenas... Da birdoj same estas multege. Kiam ili amasiĝas, ondojn ne eblas aŭdi. Jen gavioj, jen aŭkoj, jen urioj. Humila ja estas la birda popolo, senkolera. Tia amasego kolektiĝas — ne estas loko por neston fari; ili, kompatindaj, eĉ ovojn metas rekte sur ŝtonojn, senhejmaj... Kaj kiel kuraĝe flugas tiuj gavioj: la flugilojn ĝi kunmetas, kaj plonĝas per la kapo antaŭen, en la maron! Kaj jen elakviĝas kaj la flugilojn disetendas, kiel floro en kampo. Disetendis kaj balanciĝas sur ondo...

Li gaje ekridis, rememorante la vivon de la «birda popolo», eksidis kaŭre antaŭ la faŭko de la hejtata forno, kun apetito enspiris pipan fumon.

4. Sintakso kaj prozodio

Iun tagon Ievlev singarde, kun mildeco en la voĉo, demandis:

— Ivano Sabateiĉ, diru, ĉu vi estas legoscia?

Rjabov respondis ne tuj:

— Sed por kio mi ĝin bezonas?

Silvestro Petroviĉ silentis, sed pli proksime al la vespero, kiam la ŝlosisto alportis plenigitan lumilon, ekparolis rezolute:

— Jen kio, amiko kara: mi vin en multo obeas, kaj vi por mi ĉi tie estas kvazaŭ superulo. Tio estas vero. Sed en unu afero obeu vi min...

Rjabov ĉesis eltranĉi per la tranĉileto kuleron, kun miro ekrigardis al Ievlev:

— Pri kio vi parolas, Silvestro Petroviĉ?

— Divenu.

La rudristo pensis, ruze mallarĝigis la okulojn, demandis:

— Pri legoscio via. Estas tro komplike, mi pensas?

— Sensencaĵo! — diris Ievlev firme. — Anstataŭ ol tiel sidi, ni, frato, lernu...

Rjabov ŝultrolevis, glatigis la kreskintan en la malliberejo barbon, ekridis, ke por barbulo estas nekonvene legon lerni. Troviĝis libreto. Silvestro Petroviĉ ordonis dilui fulgon en akvo. La ŝlosisto alportis de supre kelkajn anserajn plumojn. Rjabov, sidante ĉe la forno, diligente skuis en flakono la estontan inkon.

Ili eksidis apude. Silvestro Petroviĉ kun delikata rideto ekrigardis al sia ŝvitiĝinta lernanto. Tiu milde ridetis responde.

En la lumilo kraketadis graso, de la forno venadis varmo, de la muro en la angulo malrapide, per gutoj, ruliĝadis akvo. En la

vestiblo estis interparolantaj la gardistoj.

Per sensonaj paŝoj estis iranta la printempa nokto.

Rjabov, snufante, kvazaŭ pro troa malfacileco de laboro, estis ete desegnanta literojn. Liaj grandaj manoj ne povis regi la paperfolion, ĝi ĉifiĝadis, ŝiriĝadis, la diluita fulgo ofte surverŝadis la skribitan. La rudristo insultadis flustre, en la marista maniero, kiel dum ŝtormo.

— Sufiĉas por hodiaŭ! — diris Silvestro Petroviĉ.

La rudristo skribis ankoraŭ literon, leviĝis, unuglute eltrinkis ĉerpilon da akvo. Post kelkaj tagoj li sciis jam multajn literojn, por li iĝis pli facile venki la skribadon — la plumon li ne kunpremadis en la fingroj, la diluitan fulgon ne verŝadis, da akvo trinkis malpli...

— Hodiaŭ ni havos gramatikon! — prononcis Silvestro Petroviĉ kaj demandis: — Kio estas gramatiko?

Rjabov rigardis sen palpebrumi, kun miro.

— Gramatiko estas certa arto bona, kaj paroli kaj skribi instruanta. Kiaj estas partoj de gramatiko? Partoj de gramatiko estas...

Silvestro Petroviĉ levis la fingron:

— Ripetu: ortografio.

— Ortografio! — kun peno ripetis la rudristo.

— Etimologio.

— Etimologio...

— Sintakso.

— Sintakso...

— Prozodio.

La rudristo silentis, liaj okuloj ridis.

— Nu! — diris Ievlev. — Kial vi silentas? Prozodio...

— Do iru ĝi for, — diris Rjabov, — tiu prozodio. Kion mi kun ĝi faros?

Ili ree skribadis literojn, vortojn; finfine la rudristo desegnis sian nomon — Ivano Rjabov. Ievlev ordonis legi. Rjabov legis kaj miris.

— Prozodio! — grumblis li, desegnante literetojn. — Ĝi ne estas prozodio. Kiu estas princo aŭ bojaro, por tiu ankaŭ prozodio taŭgos, sed por ni eĉ sen ĝi estas naŭze. Rjabov Ivano — tio estas bona, sed prozodion ni, Silvestro Petroviĉ, tute ne bezonas...

Ievlev ne disputis. Atingos ili ankaŭ prozodion, kaj verbojn, kaj verbajn voĉojn. Ĉion ili atingos kun tempo.

En tiu nokto Silvestro Petroviĉ longe ne dormis — pensis: floto, maristoj, navigistoj, ŝipestroj... Kiel instrui ilin pri tiuj nekompreneblaj prozodioj? Kial ne en la rusa, ne per simplaj vortoj estas rakontita tio, kion bezonas scii miloj da homoj?

Kaj en krepusko de la humida kamero vidiĝis al li la vizaĝo de la rudristo, la moka brilo de la verdaj okuloj, aŭdiĝis la diritaj hodiaŭ vortoj: «Kiu estas princo aŭ bojaro, por tiu ankaŭ prozodio taŭgos, sed por ni eĉ sen ĝi estas naŭze!»

Li ridetis, ekdormante: «Por iu — sonĝo, por iu — realo, por iu — trezoro, por iu — nenio!» Jen kiel parolas ili, sed ĉi tie — prozodio...

Matene, frue Silvestro Petroviĉ prenis en la manon la

plumon, desegnis la terglobon, la polusojn, la gradreton, ekparolis kiel eble plej simple. Rjabov aŭskultis atente, kapjesadis; estis videble, ke li ĉion komprenas kaj ke al li estas interese.

— Ĉi rondo nomiĝas ekvatoro aŭ egaligilo! — diris Ievlev. — Ĉu vi vidas, kie ĝi iras? Kaj ĝi dividas per si la tutan globon teran je du duonsferoj...

Post tagmanĝo ili ree okupiĝis pri geografio. Silvestro Petroviĉ malrapide klarigadis, kiel memorfiksis laŭ la lernolibro:

— Staton de teroj, se iu diligente deziras kompreni, tiam devas li scii gradojn de longitudo kaj latitudo. Latitudon, Ivano Sabateiĉ, kalkulas ni ĝis la alto de la poluso aŭ de la akso de la mondo, de la egaligilo al nordo kaj al sudo po naŭdek gradoj. Longitudon ni kalkulas de la meridiano, trairanta monton sur insulo Tenerifo, al oriento, dividante la rondon teran je tricent sesdek partoj, gradoj nomataj...

— Lerte! — diris Rjabov.

Kaj, elŝovinte la pinton de la lango, li mem komencis desegni la gradreton.

Vespere, fumante pipojn, ili rezonis pri la svedoj, kiel ili venos duan fojon. Rjabov longe aŭskultis sen interrompi, poste demandis:

— Kaj nian propran floton, sinjoro kapitan-komodoro, ĉu ni longe kaŝos? Aŭtune, kiam iris mi en la arestejon al vi, mi rigardis. Ne malbonaj ŝipoj, taŭgaj. Kaj kanonoj staras. Eliri renkonten al ili, kaj ekbatali vere?

Silvestro Petroviĉ respondis per demando:

— Ĉu ni venkos?

— Se al nia popolo oni pli da fido donus, tiam ankoraŭ ne tion kun ĝi fari eblus! Mi ja scias... Prave oni diras: kio por malbonulo estas ĝis la oreloj, tio por bravulo estas ĝis la genuoj...

Ievlev amare ridetis:

— Ni rezonas, sed mem estas en malliberejo. Ĉu multe oni nin demandos, kiam la afero komenciĝos...

Ili kuŝiĝis dormi malfrue kaj longe ne ekdormadis. Ievlev, kuŝante sur la dorso, per mallaŭta voĉo rakontadis malnovajn historiojn pri la granda vojo de la varengoj al la grekoj, pri la akva vojo inter la Nigra kaj la Balta maroj[128]. Rjabov aŭskultis, rigardante al la nigra malalta plafono. En la krepusko per malrapida vico estis pasantaj antaŭ la rigardo de la rudristo Askoldo kaj Diro, timigita Bizancia imperiestro Miĥaelo, ambasadoroj de imperiestro Bazilo, kun riĉaj donacoj elirintaj renkonten al la rusoj, la armitaj kompanioj de Olego, navigantaj mare, la ŝildo sur la pordego de Carurbo[129]...

— Vi atendu! — subite diris Rjabov. — Kie do estas ĝi, via

---

128 Komerca akva (mara kaj rivera) vojo de la Balta maro tra la Orienta Eŭropo al Bizancio en 10–13 jarcentoj *(trad.)*

129 Askoldo kaj Diro — princoj de Kievo en la 9-a jarcento, regis kune, militis kontraŭ Bizancio, dum ilia regado okazis la unua militiro al Carurbo (Konstantinopolo) en la jaro 860. Imperiestro Miĥaelo tiam regis Bizancion. Imperiestro Bazilo, reginta post Miĥaelo, sendis ambasadorojn al Rusujo, por ke la rusoj akceptu kristanismon. Laŭ iuj fontoj, Askoldo kaj Diro konvertiĝis al kristanismo; sed Rusujo entute iĝis kristana poste. Olego — reganto de Novgorodo, ekde la jaro 882 princo de Kievo (laŭ kronikoj, li mortigis Askoldon kaj Diron). Laŭ legendoj, en la jaro 907 li militiris al Carurbo; kiel signon de sia venko, li alnajlis sian ŝildon al la pordego de Carurbo. *(trad.)*

Balta maro?

Silvestro Petroviĉ leviĝis, kliniĝinte super la tablo, desegnis mapon — la Nigran kaj la Baltan marojn. La rudristo varme spiris al lia nuko.

— Kaj en Italion niaj ŝipoj iradis! — diris Ievlev. — Vidu — jen ilia vojo estis. Nun aŭskultu pri Svjatoslavo. Li havis kaj bulgarajn militistojn, kaj hungarajn.

Post Svjatoslavo kaj liaj militiroj ili denove revenis al la Balta maro. Silvestro Petroviĉ rakontis pri Granda Novgorodo kaj ties ŝipoj, pri tio, kiel Novgorodaj taĉmentoj en antikvaj tempoj navigadis sur la Ladoga lago, kiel iradis al Svedio, al Danio, kiel havis sian Komercan korton sur insulo Gotlando en urbo Visby, kiel svedoj antaŭ sescent jaroj atakis rusajn ŝipojn en la Balta maro, kiel dana reĝo Sveno IV kaptis ĉe la muroj de Ŝlesvigo trajnon de rusaj ŝipoj kaj ĉiujn rusajn varojn disdonis kiel soldon al sia militistaro...

— Do kio rezultas? — demandis Rjabov, almontrante per la fingro la desegnaĵon sur la tablo. — Rezultas, ke ankaŭ Nevo estas nia?

— Ja kies, se ne nia? — arde respondis Ievlev. — Vidu, kiel la novgorodanoj iradis. Jen ilia vojo. Ĝuste ili gardis Nevon kiel propran okulon. Kaj tiuj ĉiam al la Neva buŝo rigardis — kiel fermi ĝin por ni. Ĉiuj ĉi tien rabi venadis, ho Dio, ne eblas kalkuli. Antaŭ duonmilo da jaroj reĝo sveda Sverker kaj lia episkopo Jeskil sur sesdek ŝipoj ekiris en la Baltan maron por rabado; tri Novgorodaj ŝipoj ilin frakasis. Eriko sveda Ladogon sieĝis, la popolo mem la domojn forbruligis kaj en la fortreso ŝlosiĝis kun urbestro Neĵata. Ili venkis la svedojn. En somero de la 1240-a jaro papo Gregorio alvokis al krucmilitiro al

Rusujo, kaj svedoj venis en Nevon per multegaj ŝipoj. Princo Aleksandro Jaroslaviĉ la Neva tiel ilin frakasis, ke ili du ŝipojn da mortintaj nur plej nobelaj personoj veturigis malantaŭen...

Ili parolis ĝis aŭroro, rememoradis Ivanon la Teruran, Viŝneveckij-on, Adaŝev-on, antikvajn marajn militirojn. Ievlev detale, kiel sciis mem, rakontadis pri la uzurpintoj, pri internaj malpacoj, pri malamikoj kaj fremdlandaj aliancanoj, kiuj per ruzo kaj forto forprenadis la Baltan bordon disde Rusio, pri tio, kiel restis por Rusujo la sola eliro al maro, kiel caro Petro konkeris Azovon kaj por kio li tion faris.

Ili ekdormis, kiam la gardistoj en la vestiblo jam leviĝis sur la piedojn.

Ĉapitro sesa

Batalis ni firme — fieraj pri l' avoj,
La idoj, similaj al ni en la glor',
Pendigos kirasojn kun ŝildoj kaj glavoj
En avaj palacoj por plua memor'.

Jazikov

1. Sub aresto

Pasis printempaj, varmaj pluvoj, tondris super Arĥangelsko la unua en la nuna jaro fulmotondro, sed en la vivo de la malliberuloj nenio ŝanĝiĝis: same ili matenmanĝadis la damnitan salaton, same ilin vizitadis la «medicinisto» Jegoro Rezen, kiel povis kuracadis la vundojn de Silvestro Petroviĉ, samajn longajn, senfinajn konversaciojn faradis en vesperoj la rudristo kaj la kapitan-komodoro.

Sen novaĵoj Rezen ne venadis: foje li rakontis, ke li vidis ĉe Maria Nikitiŝna iun venintan el Moskvo homon, ĉi homo estas proksima al la ŝtata konsilio, el tie li eksciis, kvazaŭ la svedoj ree intencas almiliti Arĥangelskon kaj preparas por tiu celo grandajn fortojn — multajn ŝipojn, kanonojn, matrosojn, kaj ree serĉas piloton.

— Ĉu vere? — ne kredis Ievlev, sed enpensiĝis por longe.

Iom poste Jegoro rakontis, ke ĉe Vologdo, en arbaro, rajdistoj kaptis leŭtenanton Meĥonoŝin-on kune kun liaj arbaraj rabistoj-nobeloj, nun oni veturigas lin en Arĥangelskon, baldaŭ estos li ĉi tie, en la malliberejo. Kaj kun vojevodo Prozorovskij okazis eventoj enigmaj: ĉe tuta lia malsaneco li ne mortis, kiel

oni atendis, sed resaniĝis, ĉesis muĝi kaj eĉ intencis fuĝi, sed ne sukcesis, princo Rĵevskij la eksan vojevodon kaptis kaj metis sub fortan areston en sia domo...

— Kial do en la domo, sed ne en la malliberejo? — demandis Ievlev.

— Kiu scias! — ŝultrolevis Rezen. — Princo Rĵevskij nenion deziras fari plene. Li faras iom, iomete. Li estas tre singarda, ĉi princo. Tamen el ĉio okazinta eblas fari kelkajn konkludojn...

— Kial diveni! — diris Ievlev. — Ni jam sufiĉe divenadis, sategas ni je divenoj. Ni prefere, inĝeniero, pri la afero parolu...

Kaj ili komencis diskuti preparadon de la Arĥangelskaj trupoj kaj de la citadelo al estonta batalo kontraŭ tiu sveda flotego, kiu estis atendata plej baldaŭ.

Sidante duope ĉe la ŝanceliĝema tablo, Rezen kaj la kapitan-komodoro longe disputadis inter si, desegnadis novajn remparojn, eskarpojn, kornicojn, lokigadis baraĵojn, per krucetoj markadis lokojn de sekuraj pulvejoj, tiaj, ke ili ne brulu, kiel okazis en la pasinta batalo. Ili alie metadis bateriojn sur la bordoj de Dvino, kalkuladis forton de pafado, novmaniere distribuadis kanonojn kaj kanonistojn, rememorante, kiel kiu sukcesis en la milita laboro en la pasinta arda batalo. Ili parolis, certe, ankaŭ pri ŝipoj, kiuj devos eliri en la maron, por kunpuŝiĝi kun la malamika floto en malproksimaj apudaĵoj de la urbo...

Rjabov, instalinte sin proksime de la disputantoj, ion faradis, ian etan laboron — riparadis al Ievlev truiĝintan boton, metadis flikaĵon sur sian kaftanon, silentadis kaj ĵetadis rigardojn al la

inĝeniero kaj Silvestro Petroviĉ per bonkore mokaj okuloj.

— Kial vi ridas do? — demandis foje Ievlev.

— Ja estas tre gaje vidi, kiel vi en malliberejo, sub aresto sidante, kontraŭ la malamiko militas...

— Tio ne estas milito, tio estas ankoraŭ nur dispozicio! — kun konfuza subrido respondis Ievlev. — Pro angoro oni kion ajn komencas fari...

Li deŝovis de si paperfolion kaj por longe morne enpensiĝis, kaj la rudristo bedaŭris, ke per sia ŝerco li afliktis la kapitan-komodoron.

Meĥonoŝin kun liaj homoj vere estis alveturigita kaj enŝlosita en kameron apud Silvestro Petroviĉ kaj Rjabov. En la unua tago li kun siaj rabistoj — nobelidoj — bruis kaj batadis la pordon; poste, kiam la gardistoj, humiligante la leŭtenanton, rompis al li la ripon, li kvietiĝis, sed ne por longe. Tiam la gardistoj ekiris humiligi duan fojon...

— Ho Dio, damnitaj bestoj! — kun ĝemo diris Silvestro Petroviĉ. — Ili ja murdos lin...

La leŭtenanto ne plu aŭdiĝis entute.

En la sama semajno rajdistoj transportis en la malliberejon eksan vojevodon princon Prozorovskij-on. En lian kameron oni altrenis amboson kaj martelon; peze paŝante, venis la prizona forĝisto. Estis aŭdeble, kiel li nitas sur la bojaro piedajn kaj manajn katenojn, kiel plorĝemas la iam ĉiopova vojevodo, kiel moke krias al li kaj insultas la samaj kancelarianoj, kiuj en la proksima pasinteco timiĝis nur pro unu rigardo de bojaro Aleksio Petroviĉ.

La avo-ŝlosisto diris al Rjabov, ke la vojevodon estas ordonite teni en granda severeco kaj nutri nur per pano kaj akvo, ke oni atendas por li ĉian malbonon kaj grandan malhonoron...

Pri ĉiuj ĉi eventoj la rudristo kaj la kapitan-komodoro nur interrigardadis.

2. Nek malvarma, nek varmega

Matene al Ĥolmogoro sur riĉa barko, ornamita per tapiŝoj, venis laŭ Dvino vojevodo Rĵevskij. En la hodiaŭa nokto rajda kuriero alveturigis caran ukazon — renkonti sen ajna pompo, trupojn ne elirigi, per kanonoj ne pafi. La vojevodo konversaciis kun la kuriero, ordonis al la pafistaj regimentoj, senditaj por renkonto, tuj moviĝi al Arĥangelsko, kaj mem iris al Atanazio peti benon.

La maljunulo sidis sur la perono, varmiĝante sub la suno — en skufio, en rufiĝinta subsutano. Antaŭ li sur la malantaŭaj piedoj sidis hundido, per humilaj, dolĉaj okuletoj rigardis al la ĉefepiskopo, tiu estis karese riproĉanta ĝin:

— Tute vi, hundo, iĝis kapricema. Ĉu tio estas pensebla, ke hundo panon ne manĝas? Hieraŭ de kaĉo vi forturniĝis. Kaj la kaĉo estas dolĉa, kun mielo. Mi, eminenco, ĉi kaĉon ne sen plezuro gustumas, dum vi — hundo senrasa, sentaŭga, ne ellernis eĉ boji, sed de la kaĉo la nazon forturnas...

Vojevodo Rĵevskij staris silente, aŭskultis la konversacion de la eminenco kun la hundido, ne kredis, ke Atanazio ne vidas la gravan gaston. Finfine Atanazio levis la kapon, mallarĝiginte la okulojn demandis:

— Ĉu princo Bazilo Andrejevič?

Rĵevskij humile riverencis. La okuloj de Atanazio brileris per malbonkora lumo, longe li silente rigardis al la vojevodo. Tiu aliris al la mano, la eminenco ne benis, ne proponis eksidi, ne demandis pri sano. Ĉiam fiksrigardis. Kaj la hundido rigardis al Rĵevskij iel ruze, poste alpremis la muzelon al la tero kaj malforte, alte bojetis.

— Iru, iru! — ordonis Atanazio al la hundo. — Iru for!

La hundido ne obeis, ankoraŭ saltis, ree alpremiĝis al la tero per la antaŭaj piedoj, ekbojis mallerte. La servoknabo prenis ĝin sur la manojn, forportis.

— Do jen kia vi estas, vojevodo, — nelaŭte prononcis Atanazio. — Ne komprenas mi — ĉu juna aŭ maljuna...

— Ŝajne ne maljuna, — duonŝerce respondis Rĵevskij. — Kaj la juneco, eminenco, — same pro aferoj, kaj zorgoj, kaj pensoj — rapide malaperis...

— Prozorovskij estas multe pli maljuna ol vi.

— Ĉirkaŭ duoble.

— Kaj ĉu Ievlev Silvestro Petroviĉ estas pli juna?

— Samaĝa.

— Tiel, tiel! — la eminenco balancis la kapon. — Tiel. Ĉu ambaŭ en la malliberejo sidas? Kaj Prozorovskij kaj Ievlev? Kaj la rudristo same? Kaj Meĥonoŝin kun ili?

Rĵevskij silentis, ne komprenante, kion celas Atanazio.

— Ĉu vi ne scias, kiu pravas, kaj kiu kulpas? Ne komprenis?

— Ne mi juĝu, — modeste respondis la vojevodo. — Kiu pravas, kaj kiu kulpas — tion scias Dio kaj la granda Siro.

— Kaj vi ne scias? — altvoĉe, kun raŭko demandis Atanazio. — Vi, Ievlev-on Silvestron de la junaĝo memorante, ne komprenis — ĉu li estas spiono kaj perfidulo, aŭ heroo, pri kiu Rusujo fieri devas? Ne esploris vi, kiu estas Prozorovskij? Pri Rjabov — la plej glorinda rudristo — ne trovis tempon la veron ekscii?

Rĵevskij suspiris, ridetis ĝentile:

— Ne tiel ĉio ĉi estas simpla, eminenco. Malklara afero, malfacila, dum longa tempo pensadis mi pri ĝi, kaj ne mi decidu...

— Tiel estas pli trankvile — ne vi decidu. Ĉu la Sanktan Skribon vi konas?

— Kristano mi estas! — iom ofendite respondis la vojevodo.

— Ĉu vi memoras pri tiuj, kiuj estas nek malvarmaj, nek varmegaj? Ĉu ne ilin la Sinjoro promesis elsputi el sia buŝo? Ho gento hipokrita, kion fari kun tiaj, kiel vi, se la Sinjoro dume nur promesas, kaj vi eĉ ne timas? Por kio vi estis sendita ĉi tien? Por malimpliki ĉi implikaĵon! Kaj vi malimplikis, vi scias ĉion, vi ne stulta al la mondo naskiĝis, sed vi rezonas interne, ke vi ne hastu, ke Romodanovskij estas unuflanke, kaj Apraksin — aliflanke, ke necesas scii, laŭ kies ordono fari, ke vi havas nur unu kapon. Ĉu mi ĝuste diras?

Rĵevskij ridetis pale, silentis: la damnita popo estas saĝa, kiel serpento, legis en la koro, batis svinge, trafe. Kaj ne endis kontraŭdiri al li, li des pli koleriĝos, kaj Petro Aleksejeviĉ al li

kredas. Kaj, aŭskultante la malmildan voĉon de Atanazio, liajn krudajn kampulajn vortojn, li pensis — ĉu li liberigu tuj, senprokraste, momente el la prizono la kapitan-komodoron kun la rudristo, aŭ tio estos malbone antaŭ la veno mem de la caro?

— Rabistoj tagaj, bestoj malbenindaj, kion vi faras? — demandadis Atanazio. — La edzinon de la glora heroo Ievlev la rabobirdoj kancelarianoj timigas per malliberejo, timigas, ke orfigos la infanojn, ke tute mizerigos. Por kio? Por ke pri sia edzo ŝi depoziciu false, por ke la patron de siaj infanoj ŝi fordonu al pendigilo, por komplezon fari al iuj avaruloj kaj koruptuloj, al iuj poltronoj, perdintaj bravecon sian kaj kuraĝon! Kaj ĉu estis iam vi, nek malvarma, nek varmega, tia, kiel ceteraj veraj homoj rusaj estas? Kial vi rigardas? Ĉu vi pensas, malforta estas Atanazio, staras ĉe la rando de la tombo, ne faligos li min? Sed mi faligos! Mi nur tiun horon atendas en ĉi mondo. Tera estas homo Atanazio, kvankam en aspekto funebra. Estas peko, sed neniu min kaj vin aŭdos: en la hodiaŭa nokto mi ne dormis, ĉiam vidis, kiel mi vin antaŭ la Siro per insultaj kaj senhonorigaj vortoj skoldos, kiel ekkaĵolos vi, vojevodo, ekturniĝos, kaj mi al vi la gorĝon ŝiros! Ne timinda estas Prozorovskij — timinda estas Rĵevskij. Prozorovskij kun tempo sur pendigilo estos, kaj vi, serpento, bonstate vian teran vojon povas fini — en gloro kaj honoro. Do ne donos mi al vi tion. Ĉiun vian spiron mi el ĉi tie, el Ĥolmogoro, de Arĥangelsko aŭdis, ĉiun vian penson fian kaj malkuraĝan vidis. Iru for! Ne decas al mi ne voki vin al la tablo — vi estas vojevodo, mi estas humila kliriko, — sed la sango en mi ne estas tia. Ĵetos mi la lambastonon al vi ĉe homoj — estos pli malbone! Iru en vian restadejon, kaj prepariĝu al la caro paroli. Mi ja delonge scias, kion mi diros...

Rĵevskij tamen riverencis, humile suspiris, foriris. La monaĥo-servisto alportis en kaliko kuracilon — balzamon, senditan de Apraksin el Moskvo. Atanazio, grimacante, glutis, reĝustigis sur la kapo la skufion, ordonis doni al si «tiun damnitan hundon». La hundo kuŝis sur la dorso, la maljunulo gratadis al li la rozkoloran ventreton, demandadis:

— Kaj de kie vi tia malbela naskiĝis? Kaj kiuj estas viaj patro kaj patrino? Kaj kiu estas tiu stulta hundo, al kiu la ĉefepiskopo la ventron gratas?

Poste samloke sub la suno li dormetis iomete, pli poste, kiam de Dvino alkuris monaĥoj — li prenis la lambastonon, kaj, malforte paŝante, tute kaduka, sed kun severa brilo en la pupiloj, ekiris al la albordiĝejo — renkonti la caron. Krom Rĵevskij, ĉi tie estis neniu. Sur brilantaj akvoj de la larĝa rivero estis malrapide kaj gravaspekte per remiloj moviĝanta barko sub la cara standardo. Petro sen kaftano sidis sur la rando, rivera vento estis plenblovanta lian blankan tolan ĉemizon kun ronda holanda kolumo. Pro suno kaj vento lia vizaĝo estis malhela, deskvamiĝis haŭto sur la nazo, hele brilis la blankaj, egalaj dentoj. Desaltinte sur tabulojn de la albordiĝejo, li per rapidaj paŝoj aliris al Atanazio, fiksrigardis lin, sulkiĝis:

— Kiel vi maljuniĝis, patro! Kial tiel? Ĉu vi malsanas?

Li odoris je ŝvito, peĉo, kanabaj ŝnuroj. Atanazio silentis, pririgardante la caron, ĉirkaŭe bruis la sekvantaranoj — saltadis de la barko sur subfleksiĝantajn humidajn tabulojn de la albordiĝejo, elĵetadis bareletojn, kestojn, korbojn. Remistoj kun peno trenis pezan Golovin-on, li ridis, ke ili faligos lin en la akvon.

— Kaj ankaŭ vi, Siro, nun ne estas juna! — prononcis

Atanazio. — Jen, hargrizo aperis...

Li subite plorsingultis, sed retenis sin kaj diris nur:

— Ĝisatendis mi vin.

Li malalte riverencis, petis:

— Honoru, Siro, gustumi mian panon kaj salon. Mi ĉiujn petas, krom sinjoro princo-vojevodo Rĵevskij. Li ĉe mia tablo ne sidos!

Rĵevskij terure paliĝis, Petro demandis obtuze:

— Ĉu vi stultumas, oldulo?

— Eĉ se tiel! — trankvile kaj eĉ majeste respondis Atanazio. — Nemulte ja restis stultumi, vi mem vidas, la pasinteco forpasis, ne plu mi ŝiros barbojn...

Petro ŝultrolevis, ekiris antaŭen. Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov, surmetante dum irado kaftanon, tiris rigidiĝintan Rĵevskij-on je la maniko, demandis:

— Kio, Baĉjo? Ĉu vi sufiĉe hipokritis? Avertis mi vin, hundinidon, faru kun Ievlev bone. Vi ĉiam serĉis, kiel Teodoron Jurijeviĉ-on kaĵoli, ĉiam serĉis, kiel por ĉiuj komplezi. Do jen vi komplezis...

Kaj, atinginte Apraksin-on, li gaje interesiĝis:

— Ĉu Silvestron do oni liberigis?

Teodoro Matejeviĉ rapide ĵetis rigardon al Menŝikov, respondis:

— Oni diras, ke li fartas malbone, kaj plu estas en malliberejo. Pli rapide necesus, ja vere eĉ minuto kostas multe...

Jam subiris la suno, kiam Petro eliris el la bieno de la ĉefepiskopo. Li estis sola, sen ĉapo, en malbutonita kaftano, fumis pipon. Apud la pordego kun nekovritaj kapoj estis atendantaj la caron ferdekestro Semisadov, Jegoro kaj Ĥagajo Pustovojtov-oj, kaj maljuna Simono Borisoviĉ.

— Nu? — nelaŭte, base demandis Petro.

Kaj kriis:

— Mi scias, ĉion scias! Sufiĉas!

Poste ordonis:

— Voku ĉi tien Rĵevskij-on!

En densa mallumo de la senluna, senstela vespero la monaĥoj, servantaj al Atanazio, ekkuris serĉi la vojevodon. Petro sidis sur benko ĉe la pordego, silente snufadis per dolĉe odoranta forta tabako, aŭskultadis ebriiĝintan Jozefon Baĵenin-on, kiu fanfaronis pri tio, kiel rapide kaj en precizaj proporcioj li konstruis nun fregaton. Estis tre varme, kviete, ie bruis tondro, delonge estis prepariĝanta fulmotondro, sed ĝi neniel povis veni. El la pordego eliris Menŝikov, ŝanceliĝante diris:

— Nu, manĝigis nin la avo sate, jes, manĝigis. Vi, *Min Her*[130], fiŝon ne manĝas, sed lia fiŝo estas — o ho...

Petro ne respondis. Menŝikov ankoraŭ paŝis antaŭen, ekridis:

— Nenio videblas tute. *Min Her*, eble, mi jam mortis, ĉu? Eble, al mi ĉio ŝajnis?

— Hungara vino ĉiam tiel batas! — de la benko diris Petro.

130 De nederlanda «Mijn Heer» — «Mia Sinjoro»: populara alparolo en la proksima rondo de Petro. *(trad.)*

— Iru al la voĉo, eksidu.

Aleksandro Daniloviĉ eksidis, dolĉe oscedis, ree ekridis:

— Jen avo, kia avo! Kiel li pri Baĉjo Rĵevskij diris. Kaj draŝas, kaj draŝas! Mi tiel pensas — peli necesas Rĵevskij-on kiel hundon...

— Ĉu vi pensas? — morne demandis Petro.

— Kaj kio, *Min Her*, kial ne peli? Vi en Voroneĵo, kaj en Moskvo, kaj ankoraŭ kiam ni al Pskovo veturis, ĉiam min skoldis, ke mi por Silvestro parolas. Sed rezultas — mi estis prava. Kaj Teodoro Matejeviĉ...

— Sufiĉas babili! — interrompis Petro.

Kaj li ree komencis konversacii kun Baĵenin.

Kiam oni trovis Rĵevskij-on kaj kondukis lin al Petro, tiu vokis lin en la domon de Atanazio, ŝlosis sin kun li en malproksima kvieta ĉelo kaj, ne eksidante, demandis:

— Vi por kio ĉi tien estis sendita?

— Princo-cezaro Teodoro Jurijeviĉ...

Petro kunpremis la dentojn, svingis la manon, batis la vojevodon per la grandega pugno al la vizaĝo. Tiu ŝanceliĝis, Petro kaptis lin je la kolumo de la kaftano, batis al la muro, globigante la okulojn ĵetis sur la plankon, piedbatis...

Poste, retrovinte spiradon, ordonis:

— Iru for kaj eĉ spuron ne lasu. Mi revenos al Moskvo, tie mi ankoraŭ pridemandos. Sed nun iru for de ĉi tie... Kanajlo...

Kaj li ordonis al Baĵenin prepariĝi veturi al la ŝipkonstruejo — rigardi la fregaton.

3. Kaftano kaj festeno

En Pentekosto[131], nelonge antaŭ la tagmanĝa tempo malfermiĝis pordo, kun riverencoj, timigita eniris kancelariano Abrosimov, lispante, deklaris:

— Gratulon pro saviĝo, sinjoro kapitan-komodoro! La Siro baldaŭ en Ĥolmogoron alvenos. La vojevodo tien sin direktis — renkonti. Kaj vi, Silvestro Petroviĉ, kaj vi, Ivano Sabateiĉ, ne juĝu tro severe! Nia afero estas obei, vi mem scias, kio desupre estas ordonita, tio de ni estas plenumita. Kaj ĉu mi ne penis fari bone...

La ŝlosisto purigis la kameron, la kancelariano ordonis alporti betulajn branĉojn, freŝan kvason.

Kun la samaj novaĵoj alkuris Jegoro Rezen: oni diras, ke la Siro iras sur barko laŭ Dvino, kun li estas Menŝikov, Apraksin, Golovin, poste sekvas carido Aleksio kaj multaj trupoj. Oni aŭdis, ke la Siro pri la Arĥangelskaj aferoj estas kolera kaj ke li konversacios kun Atanazio, kaj pri kio — neniu scias.

— Ne scias obstino, kiel sonas tamburino! — kun subrido diris Rjabov. — Neniu scias! Ĉu vi kun ni matenmanĝos, sinjoro inĝeniero?

— Ho, la salato nun ne necesas! — ekkriis la «medicinisto». — Tute baldaŭ hejmen! Jes, hodiaŭ, morgaŭ...

— Kiam ni revenos, tiam ni diros — ni hejmen venis! — diris la rudristo. — Sed nun ne malaperu vane la manĝaĵo!

---

131 En la jaro 1702 — la 26-an de majo laŭ la Julia kalendaro, la 6-an de junio laŭ la Gregoria kalendaro *(trad.)*.

Kaj, kuntirinte la brovojn, li eksidis al la salato, kiel al malfacila laboro. Sed ĝi en tiu ĉi mateno tute ne iris en la gorĝon. Apude ekhurlis, ŝajnigante sin freneza, leŭtenanto Meĥonoŝin; ŝrikis, skrapante la pordon kaj elpetegante almenaŭ aĉan popeton — konfesi la pekojn, bojaro Prozorovskij, insultis la gardistoj. Rjabov, maĉante la salaton, nur balancis la kapon:

— Jen kiel! Ne vane oni diras: kiu vivi ne scipovis, tiu ankaŭ morti ne ellernos. Honto, je Dio...

— Eble, li antaŭ siajn okulojn vokos, en la palacon, — iom poste supozis Ievlev.

— Ĉu vokos? — dubis la rudristo.

— Kiel ne voki? Se li mem ĉi tien ne venis — li vokos.

— Ankaŭ anseron oni trenas al nupto, tamen por supo! — kun kolera subrido diris Rjabov.

Ili silentis longe.

Ree eniris kancelariano Abrosimov, jam ne riverencante; ordonis al la forĝisto kateni per ĉenoj ambaŭ malliberulojn — kaj Rjabov-on kaj Silvestron Petroviĉ-on. La rudristo ekinsultis. Abrosimov per laŭta voĉo vokis la gardistojn, ambaŭ malliberulojn ili tordis, faligis sur la teron, ĉenon en la muran ringon traigis Abrosimov mem. La kvason kaj la betulajn branĉojn oni forigis.

Pro rigida fera ringo al Silvestro Petroviĉ malfermiĝis la vundo, abunde verŝiĝis sango. La rudristo, disŝirinte per la dentoj la ĉemizon, penis stringi al li la kruron super la vundo, sed sango plu fluis. Estis videble, ke Ievlev malfortiĝas, ke fortoj forlasas lin. Konsolante Silvestron Petroviĉ-on kaj mem neniom kredante siajn vortojn, Rjabov diradis:

— Mankas al li tempo, sinjoro kapitan-komodoro. Vi ne afliktiĝu! Ĝuste pro tio ili nin katenis, ke li ne tuj ĉi tien ekiris. Lia afero estas cara — kien li deziras, tien li sin direktas. Nu, kaj la serviluloj — ili, kiel ĉiuj scias, ĉiam restas servilaj — ektimis, ke estis tro afablaj al ni, kaj en alian flankon turniĝis. Lasu, Silvestro Petroviĉ...

Dum la nokto Ievlev tute malfortiĝis: ankoraŭ unu vundo malfermiĝis sur la kruro. Rjabov, ĝis la mateno ne fermante la okulojn, penis tiel detiri la katenan braceleton, ke la fero ne penetru en la randojn de la vundo, sed Silvestro Petroviĉ ĵetiĝadis, la katenoj elglitadis el la manoj de la rudristo. Antaŭ mateniĝo, tute elturmentiĝinte, Rjabov diris al la ŝlosisto:

— Jen kio, maljunulo! Mi vin en la antaŭa tempo el akvo elprenis — servu nun al mi: kuracisto necesas. Vi mem vidas — sinjoro Ievlev tute malbone fartas, ne povas mi reteni la sangon. Se li mortos — de vi la caro demandos, vi respondos, kaj lia parolo estas mallonga, vi mem pri tio scias...

La ŝlosisto timigite eksvingis la manojn, lispis:

— Ivano Sabateiĉ, hodiaŭ tio neniel eblas. Rajdistoj ĉirkaŭ la malliberejo staras, — eĉ muso ne trairos! La kancelarianoj kvazaŭ freneziĝis: antaŭ nelonge al mi per knuto minacis, caran koleron jen kiel timas. Indulgu, ne petu, kiom da mia vivo restis, nuraj larmoj...

Kaj li foriris, riglinte la kameron kaj dufoje turninte ŝlosilon en la seruro.

Rjabov eksidis en angulo, kunpremis la dentojn.

Silvestro Petroviĉ tiel elturmentiĝis, ke eĉ la manon ne plu povis movi — tute malfortiĝis. Nun li deliris. La rudristo

fiksaŭskultis lian klaran flustron, mallongajn ekkriojn kaj — komprenis: Ievlev komandas batalon. Tio, kion ne faris li en la vivo, estis fariĝanta nun en lia inflama cerbo: li viziis ŝipojn kaj al li ŝajnis, ke li kondukas en batalon rusan eskadron. La sekaj lipoj de Ievlev klare prononcadis vortojn de komandoj, apenaŭ aŭdeble li laŭdadis siajn kanonistojn, ŝipatakajn soldatojn kaj aglojn-matrosojn, kiuj grandan viktorion faris super la latrona malamiko.

Obtuze tintante per la katenoj, la rudristo aliris al la tabullito, malleviĝis antaŭ Ievlev sur la genuojn, malalte klinis la kapon. Apude sur la planko staris kruĉo kun akvo; Rjabov trempadis en akvo ĉifonon, malsekigadis per ĝi la sekiĝintajn lipojn de Silvestro Petroviĉ. Tiel pasis vespero, venis varma nokto.

Estis tute malfrue, jam kriis duaj virkokoj, kiam sur la ŝtuparo aŭdiĝis peza bruo de botoj kaj flava flamo de dense fulgantaj peĉaj torĉoj prilumis la humidajn volbojn de la kamero, la nigran pajlon, sur kiu senmove etendiĝis Ievlev, la kliniĝintan super sia kapitan-komodoro rudriston.

Caro Petro en verda Preobraĵenska kaftano, sen kapvesto, altega, aliris dense al la tabullito, demandis ordone:

— Ĉu li ekmalsanis?

— Li mortas! — respondis la rudristo, rigardante al Ievlev.

La caro kliniĝis al Silvestro Petroviĉ, prenis lian manon, vokis kuraciston. La truoj de la mallonga nazo de Petro tremis, la pupiloj de la globaj okuloj brilis kolere kaj hele, la buŝo sub la malmolaj vilaj lipharoj estis firme kunpremita. La kuracisto flankenigis la rudriston, soldatoj kun torĉoj aliris pli proksime.

Rjabov ekstaris de sur la genuoj, ekrigardis al la okuloj de Petro.

Ili longe rigardis unu al la alia, ambaŭ grandegaj, je kapo pli altaj ol ĉiuj sekvantoj, kaj subite la vizaĝo de Petro — sunbruna, kruda pro vento, severa — kvazaŭ nerimarkeble tremeris kaj por mallonga momento mildiĝis. Li je la ŝultroj altiris Rjabov-on al si, kaj, nenion dirante, kun mira kaj nevidita karesa esprimo de la okuloj, trifoje, pikinte per la malmolaj lipharoj, kisis al la lipoj; poste, kvazaŭ ekhontinte pro tiu sia ago, sed plu firme tenante la rudriston je la ŝultro, turnis sin al Ievlev, super kiu estis klopodanta la fremdlanda kuracisto.

— *Was*?[132] — bruske demandis lin Petro.

Tiu trankvilige ekbalancis la kapon.

La timigita kaj pro tio mallerta prizona forĝisto per ĉizilo estis malfermanta la ĉenon, fulgis kaj krakadis la torĉoj; maljuniĝinta, kun ŝvelaĵoj sub la okuloj Apraksin estis diligente diluanta en kruĉeto konjakon kun akvo. Petro, plu tenante Rjabov-on je la ŝultro, kun maltrankvilo fiksrigardis al la vizaĝo de Ievlev. Plu farante per la muskolaj, nudaj, harkovritaj manoj sian laboron, la kuracisto rapide, severe, en la germana estis klariganta, ke, tute probable, kapitan-komodoro mortos, ĉar sango forlasis multajn ujojn, kvankam, tamen, malesperi ankoraŭ estas tro frue.

— Jen ankoraŭ — ĉeno! — kriis Petro al la forĝisto. — Sur la rudristo!

Tiu, timante la caron, la sekvantaron, la fulgantajn torĉojn,

---

132 Kio? (en la germana) *(trad.)*.

aliris al Rjabov, metis la ĉizilon, batis per la martelo. La ĉizilo kun grinco deglitis.

— Ne tiel vi faras! — kolere diris Petro. — Rekte metu, sed ne flanke, majstro! Kaj batu kun retiro!

La forĝisto mordis la lipon, batis ankoraŭ foje, la nito elsaltis. Petro mem deŝiris de la rudristo la ĉenojn kaj rapide, per la grandaj, en skrapvundoj, fingroj komencis malbutoni sur si la Preobraĵenskan kaftanon. Unu korna butono neniel povis malbutoniĝi, li tiris, deŝiris. Sekvantaranoj ĵetiĝis helpi, Petro kolere movis la ŝultron:

— Mi mem! Ne malhelpu!

— Vi mem, *Min Her*, ĉiujn butonojn deŝiros! — grumble diris Menŝikov. — Atendu, ne hastu...

Li malfermis sur Petro la bukojn de la zono, dekroĉis la spadon de la portepeo. La caro deĵetis de la ŝultroj la kaftanon, etendis, ĉifinte, al Rjabov. Tiu, ne komprenante, ne prenis. De ĉiuj flankoj la sekvantaranoj sufloris:

— Al vi la kaftano, al vi, laŭ la moro!

— Prenu, kampulo, la caro de sia ŝultro per kaftano regalas!

— Prenu, surmetu...

Rjabov prenis la kaftanon, iu flanke siblis:

— Ekstaru sur la genuojn, kisu la fingrojn carajn, falu, riverencu...

— Monon! — ordonis Petro.

— Ĉi tie estas mono, *Min Her*! — de malantaŭe diris Menŝikov kaj donis monujon.

Petro elŝutis ormonerojn sur la polmon, pensis dum malgranda tempo, poste etendis ĉion al Rjabov. La sekvantaranoj interflustris: ĉi-foje la Siro neniom avaris, ne ŝparis, kontraŭ la kutimo, oron. La rudristo prenis la monon, larĝe ridetis, diris al Petro:

— Kaj pro la ormoneroj dankon, Siro! Maldikiĝis mi iom pro ŝtata nutrado, nun, eble, mi ripozos.

La caro, ne aŭskultante, levinte la kapon, diris dise, laŭte, klare:

— Gratifikas ni vin, rudristo Rjabov Ivano filo de Sabateo, per nomo de la unua piloto kaj unua matroso de nia Rusia ŝipa floto, kaj de impostoj, tributoj, devoj kaj aliaj ceteraj depagoj estos vi kaj via genero por eterne liberaj...

Li returniĝis, kun subita furiozo en la voĉo ordonis al sekvantaranoj:

— Skribu, alie, okaze, vi forgesos!

Rjabov garde, por ne ŝiri ĉe la ŝultroj, estis surmetanta la kaftanon. Lia vizaĝo nun estis same pala, kiel de Ievlev, sur la frunto aperis ŝvito. Sekvantaranoj rigardis al li kun afablaj ridetoj, unu dikventrulo komencis helpi butoni.

— Mi mem sukcesos, ne infano! — depaŝinte de la sekvantarano, diris la rudristo.

Li riverencis al la caro per ĝiszona riverenco, senhaste rektigis la larĝajn ŝultrojn, trankvile ekrigardis en la brunajn, fajrerantajn okulojn de Petro, demandis:

— Ĉu panon kaj salon gustumi vi venos al mi, Siro?

Petro subridis:

— Ĉu vi min solan invitas aŭ kun la tuta kompanio?

Rjabov malrapide ĉirkaŭrigardis la sekvantaron, kvazaŭ kalkulante mense, poste diris:

— Nu, eblas! Ili eniros, mi pensas, la domo ne krevos...

Kaj post paŭzo aldonis:

— Kaj se ne eniros, ni eksteren eliros. Ĉe ni tio estas en la moro — en libera aero festenon primeti...

Venis soldatoj kun brankardo, garde kuŝigis sur ĝin Ievlev-on. En la vestiblo estis senĉesa bruego — tie per pioĉoj kaj hakiloj oni rompadis la mallarĝan pordon, detruante malnovajn brikojn, per rompostangoj deŝiradis feron, por traporti Silvestron Petroviĉ-on. La kuracisto ekiris post la kapitan-komodoro. Petro eksidis sur la tabulliton, etendis la longajn krurojn, apogis unu manon al la flanko, la alian — al la genuo, abrupte ordonis:

— Prozorovskij-on ĉi tien kaj ekzekutiston!

Li ekrigardis al Rjabov:

— Kaj vi, piloto, iru, kaj nin atendu! Ĉu vi sukcesos? Ni tagmanĝi venos!

— Ne la unuan fojon ni gastojn regalos! — subridis Rjabov. — Ja ni estas rusoj, ne fremdlandanoj...

Petro apenaŭ rimarkeble kuntiris la brovojn, sed Rjabov ne ekvidis tion. Per sia balanca, marista irmaniero li eliris en la vestiblon, per la okuloj trovis la tute rigidiĝintan pro timo maljunan ŝlosiston, ĵetis al li ĉervoncon por ke tiu ne malhonorigu sian maljunecon en la malliberejo. La maljunulo ekriverencis, eklispis. Rjabov leviĝis supren, per plena brusto

enspiris freŝan, malvarmetan aeron kaj intencis interŝanĝi kelkajn vortojn kun la gardistoj, kiam subite de malsupre, el la subteraĵo li aŭdis longan, hurlan, teruran krion de Prozorovskij. Svinginte la manon, sufere sulkiĝinte, Rjabov haste eliris el la pordego kaj ekpaŝis al la domo en Muskoj.

Nemalproksime de la preĝejo de Sankta Paraskeva renkontiĝis al li Semisadov.

— Estos vi riĉa, mi vin ne rekonis![133] — diris per trankvila voĉo la ferdekestro. — Saluton, rudristo! Kio ĝi estas sur vi — ĉu kaftano nova?

— Jen, vidu, vestiĝis mi iomete! — respondis Rjabov.

— Bona kaftano! — palpante per la krudaj fingroj la drapon, diris Semisadov. — Impona kaftano! Bedaŭrinde, unu butono mankas — deŝiriĝis. Ankaŭ tia butono monon kostas. Ĉu kornaj?

— Verŝajne, kornaj.

— Mi por vi lignan eltranĉos, kaj per fulgo farbos. Vi alkudros, estos nerimarkeble...

Li subridis kaj aldonis:

— Jen kia kaftano! Rigardos mi al vi, rudristo, kaj mem en la malliberejon min petos meti, se tie oni per kaftanoj regalas...

— Ja tie oni tiel regalas...

Ili plenigis la pipojn, Semisadov lerte elbatis fajron.

— Do — ĉu al la hejmo vi iras? Liberigis oni vin?

— Ja ŝajne dume liberigis!

---

133 Rusa ŝerca antaŭsigno, ke tiu, kiun oni ne rekonas, iĝos riĉa *(trad.)*.

— Ĉu la caro?

— Li, Petro Aleksejeviĉ...

— Lerte vi elturniĝis! — diris la ferdekestro. — Ruze elturniĝis, rudristo. Ne senkaŭze oni ĉe ni diras: apud la caro — apud la morto. Se vi ne divenos ion — vi pereos. La ĉapo estas ĉi tie, sed la kapo perdiĝis...

Li ekridis:

— Ĉu mi prave diras?

— Ĝi estas vero! — konsentis la rudristo. — Speciale sen bonaj homoj. Aŭdis mi, ke ankaŭ vi al Ĥolmogoro veturis kun iuj aliaj?

— Okazis, ni veturis. Atanazio, la eminenco, sian serviston por ni sendis.

— Ĉu vi diris ion al la caro?

— Ne sukcesis! Li ekbruis al ni: scias mi, diras, ĉion mem scias...

— Kial do li sciis, sed sub aresto tenis?

— Estas lia, Sabateiĉ, volo. Mi tiel pensas — estas ankoraŭ bone, ke li liberigis...

— Kaj por kio nin teni necesis?

— Li, verŝajne, pli bone scias! — kun subrido diris Semisadov. — Mi diras — estas bone, ke li liberigis. Kiel Silvestro Petroviĉ fartas?

— Ne tre sana. Forportis oni lin.

— Li reviviĝos! — certe diris Semisadov. — Nun por li estos bone, nun oni lin honorigos. Oni diras, grandan rangon li

ricevos. Al kiu estos malbone, Ivano Sabateiĉ, do tio estas Prozorovskij. Kaj al Rĵevskij nun estos ne dolĉa vivo. Pli malbona ne ekzistas.

— Se vi iĝis popo — servu ankaŭ funebrojn! — respondis Rjabov. — Al ĉiu la sian.

— Ja por ili estos certa funebro...

Ili parolis pri la svedoj. Semisadov rakontis, ke kvazaŭ krozis eskadro en la Blanka maro, sed ien foriris. Rjabov demandis:

— Ĉu hodiaŭ vi ĉi tie estos?

— Ĉi tie, en Arĥangelsko.

— Ĉu la vojon al mia domo vi ne forgesis?

— Ŝajne, ne forgesis.

— Kaj se ne forgesis — venu, festenon ni primetos. La caro per oro regalis, necesas festi...

— Kaj vere — ne peltmantelon kudri.

— Vere, ne peltmantelon. Mi jam forgesis, kiel festi kun facila koro. Venu, ferdekestro.

— Kaj mi venos. Ni gratulos vin, ke vi eliĝis.

— Min gratulos, aliajn rememoros, iun ankaŭ laŭdos pro fidela amikeco. Aferoj troviĝos. Nu, iros mi, tempas...

Li ĝis pikdoloro en la koro deziris iri hejmen al Muskoj, sed estis maldece hasti antaŭ la okuloj de Semisadov, ne vira estas afero hasti en sian domon, ne decas al viro kun hargrizo en la barbo salti kiel kapro al sia pordego. Kaj tial li ĝis la angulo mem iris malrapide, anaspaŝe, nur poste ekkuris, peze frapante

per la botoj al la sekiĝinta tero. Ĉe sia barilpordeto la rudristo staris iomete — lin ne tenis la piedoj.

Poste li premis la riglilon, trairis la korton kaj leviĝis sur la peronon.

4. Denove en la vojevoda domo

Strange, kvazaŭ en sonĝo travivis tiun ĉi longan tempon Maria Nikitiŝna. Iam ŝajnis al ŝi, ke ŝi restos tute sola en la mondo, ke ĉiuj forturniĝos de ŝi, malfavorata, ke ne ricevos ŝi nun leteron de malnova, bona amikino, ke neniu rememoros pri ŝi, perdita en Muskoj en fora Arĥangelsko.

Sed okazis alie.

La unua sendis por ŝi monaĥon-serviston eminenco Atanazio. Ŝi ektimis, sed la pala, humila, kun mallevitaj okuloj novico insiste konsilis al ŝi nepre veturi, kaj ŝi ekveturis. Dum la tuta longa vojo la servisto ne diris al ŝi eĉ unu vorton. Silentis ankaŭ la monaĥoj-remistoj. La tago okazis rare kvieta kaj varma, Dvino kvazaŭ glaciiĝis langvore sub varmegaj sunaj radioj, de la ĉebordaj arbaroj venis densa kaj sufoka odoro de rezino...

Atanazio renkontis ŝin silente, konsolajn vortojn ne diris, nenion promesis. Sed lia malalta voĉo estis afabla, rigardo el sub la pendantaj brovoj — severa kaj trankvila, en la animo de Maria Nikitiŝna subite iĝis facile, kvazaŭ okazis nenio terura kaj nekorektebla. Kun saĝa subrido aŭskultis li ŝian rakonton pri tio, kiel venadis al ŝi la kancelarianoj, kiel postuladis, ke ŝi kalumniu Silvestron Petroviĉ-on, kiel ili timigadis ŝin per

malliberejo kaj fora ekzilo. Poste li subite ordonis:

— Kiam en proksimaj tempoj vi al mi veturos — la filinojn kunprenu. Ili en la bieno petolu. Ĉe mi, vidu, kaj ĝardeno estas nemalbona, katino naskis — estas katidoj, unu monaĥo — drinkulo, portas pentopunon — lerte fabelojn rakontas, mi lin longe aŭskultas. Kaj ne ploru, infano, ne indas!

Maria Nikitiŝna viŝis la rapide ekŝutiĝintajn larmojn, sed tuj ekploregis. Atanazio sidis senmove, mallevinte la kapon, poste diris nelaŭte:

— Ho, malfeliĉo! Sed ne gravas, ĝi forpasos. Kaj vi ne estas sola — pri tio memoru. Kaj li ne estas sola — via glora heroo Silvestro Petroviĉ. Sciu — sed ne babilu vane, — multaj homoj en Moskvo pri li memoras kaj ĉion, kio necesas, faras. Estas malfacile al ili — kun singardemo necesas agi, Petro Aleksejeviĉ ŝerci ne ŝatas; se fari haste, eblas fuŝi... Ĉu monon vi havas?

— Havas, eminenco.

— Ĉu multe?

Ŝi ne respondis. Forakompanante ŝin, li ion mallaŭte ordonis al sia servoknabo, al la velboato oni pelis ĉaron kun barelo da butero, kun tineto da mielo, kun sakoj da faruno. Maria Nikitiŝna ektimis, diris, ke ŝi bezonas nenion, li respondis severe:

— Ne por vi, stulta, por la filinoj — Irenjo kaj Venjo. Post tempo mi sendos por ili kurieron. Kaj ankoraŭ kunprenu la filon de ĉi rudristo...

Kun la infanoj ŝi loĝis en la ĉefepiskopa bieno semajnon, kune kun ili ŝi aŭskultadis la monaĥon-drinkulon, sur velboato

ŝi iradis laŭ Dvino, veturadis en ĉareto admiri de sur holmoj la malrapide fluantan riveron. Samtie oni kuiradis fiŝsupon, Ivaĉjo Rjabov rajdis sur blindeta eksstalono, la knabinoj aĥadis, rigardante al la lerteco de Ivaĉjo...

Atanazion ŝi preskaŭ ne vidis, li malsanis, estis okupita. Foje ŝi kun miro rekonis en homo, kiu eliris el la ĉambroj de Atanazio, Jegoron Rezen-on. Ŝi vokis lin, sed li ne aŭdis, enseliĝis kaj forveturis. Ia kaŝa laboro, konstanta kaj malfacila, estis farata ĉirkaŭ ŝi, kaj ŝi komprenis, ke multaj homoj helpas al Silvestro Petroviĉ kaj Rjabov, pensas pri ili, neniam forgesas ilin...

Foje en sabata vespero en la domon de Rjabov en Muskoj venis nekonata homo en kaftano el bona dika drapo, kun atenta, fiksa rigardo, vokis Maria-n Nikitiŝna-n, silentis iom, eksidis sur benkon, viŝis la grandan, variolmarkitan vizaĝon per tuko, poste transdonis al ŝi riverencon de Aleksandro Daniloviĉ. Ŝi, ruĝiĝinte, dankis, demandis, kia estas sano de Menŝikov.

— Nemalbone, li estas sana! — respondis la nekonato. — Ĉu la filinoj estas sanaj?

— Ankaŭ la filinoj, dankon, estas sanaj.

— Tio — danke al Dio. Kio pri la vundoj de Silvestro Petroviĉ?

— Oni rakontas, ne tro bone. Sed tie ja...

La nekonato interrompis:

— Ankaŭ tie helpi eblas. Per ora ŝlosilo ajnaj, patrino mia, pordoj malfermiĝas. Nur estu la ŝlosilo!

Kaj, ĝemetinte, li elprenis el profunda poŝo monujon:

— Ĝi taŭgos.

Venadis ankoraŭ homoj: kun bona vorto — de ambasadoro en Danio Izmajlov, kun sendaĵo — de Andreo Andrejeviĉ Vinius, kun saniga eliksiro por Silvestro Petroviĉ — de iu persono, ne dezirinta nomi sin.

Tiel daŭris ĝis kiam subite en griza nokto, en la plej malluma tempo revenis hejmen Ivano Sabateiĉ, kaj post li, ankoraŭ ne sukcesinta rakonti klare, Maria Nikitiŝna ekvidis Menŝikov-on, tute saman, kiel antaŭ multaj jaroj, — gajan, en rubandoj, iomete langvoran. Salutinte ŝin tiel, kvazaŭ ili disiĝis nur hieraŭ, kisinte la filinojn, li ordonis al Maria Nikitiŝna tuj prepariĝi iri al alia loĝejo, merita la familion de la glora heroo kaj subadmiralo de la Rusia floto Ievlev. Kaj en la korto de la domo de Rjabov en tiu aŭrora tempo jam henis kaj mordadis ĉevaloj en Moskvaj jungilaroj, caraj koĉeroj insultadis unu la alian kaj galantegaj ĉambristoj kun paĝioj de Menŝikov, nenion demandante, mem estis pakantaj la havaĵon de Ievlev...

Maria Nikitiŝna, kun ruĝaj makuloj sur la vangoj, hontante antaŭ la servantoj, nenion ankoraŭ bone komprenanta, vestis la dormemajn filinojn, forgesis adiaŭi la familion de Rjabov, revenis, brakumis Taisja-n, la avinon, Rjabov-on mem, ree aperis sur la perono, demandis Menŝikov-on:

— Sed kien do veturi, Aleksandro Daniloviĉ? Konfuziĝis mi tuta, nenion komprenas...

Ŝi tremis pro matena freŝeco, kaj li, ĵetante al ŝi rigardojn per siaj ruzaj okuloj, ĉiam pri io ridetadis kaj silentis. Ŝi subite rememoris pri la monujo da ormoneroj, kiun li sendis, kaj pri la ora ŝlosilo, sed li, subridante, ŝultrolevis:

— Mi unuafoje aŭdas! Kia monujo? Mi, Maria Nikitiŝna, estas homo malriĉa, rangon havas nur de leŭtenanto, de kie mi havu oron per monujoj. Pro la cara salajro bombardista leŭtenanto ne povas riĉe vivi...

Li helpis al ŝi eksidi en ĉareton, oportune kaj lerte donis al ŝi la filinojn, la muskoloraj sataj ĉevaloj ekkuris glate, antaŭe — kun krio — «he, for!» — impetis famaj Menŝikov-aj kuristoj, la ĉareto mole, kviete ekbalanciĝis sur larĝaj rimenaj risortoj, kaj Maria Nikitiŝna komprenis: ŝia terura malfeliĉo pasis, nun ĉio iros en nova maniero, venis la horo de justo! Kaj kiam la ĉareto turniĝis al la pordego de la eksa vojevodo Prozorovskij, Maria Nikitiŝna sidis kun alte levita kapo, tute alia, ol antaŭ minutoj, ne simila al si en la juneco, kiam ŝi kun Apraksin — feliĉa, bonkora, malpeza — la unuan fojon estis alveturanta al la sama domo, kie atendis ŝin, pensis pri ŝi, ne sciante, ke ŝi venas, juna Silvestro Petroviĉ. Ne, nun en la korton de la vojevoda bieno enveturis tute alia Maria Nikitiŝna...

Ĉi tie ankoraŭ neniu dormis: fortikaj soldatoj en malbutonitaj Preobraĵenskaj kaftanoj, kun pipoj en la dentoj, kancelarianoj Molokojedov, Gusev kun Abrosimov, ankoraŭ iuj severaj uloj estis eltrenantaj sur la altan skulptitan peronon pakojn, kofrojn, korbojn, kun senkuraĝa plorkrio ĵetiĝadis inter abundo de siaj aĵoj nudkapa, ŝvelinta pro larmoj princino Eŭdokia, paŝadis la akranaza, kvazaŭ batita, kvieta princido, lamentis kaj diradis fremdlandajn plendajn vortojn la vejnecaj princidinoj. Ekvidinte Menŝikov-on, la soldatoj per bajonetoj komencis dispuŝi la familion de la eksa vojevodo, por ke ili ne ŝirmu la vojon, kaj Maria Nikitiŝna nelaŭte diris:

— Kio do fariĝas, Aleksandro Daniloviĉ? Kien ilin? Pro

kio?

Princino Eŭdokia svinge falis antaŭ Menŝikov sur la genuojn, ekpreĝis laŭte:

— Sinjoro Jesuo Kristo, patro, absolvu, kiel ni sukcesos por tia malproksimo, almenaŭ ĝis morgaŭ, ĝis vespero prokrastu la ekzilon, ne sola mi estas — kun la infanoj...

La dikaj blankaj manoj de la princino estis kaptantaj la ŝuojn de Menŝikov, ŝi alpremiĝadis per la ŝminkita vizaĝo al liaj piedoj, kaj li malpacience kaj incitite kriis al la soldatoj:

— Ĉu vi la caran ukazon ne scias? Elĵetu ilin el ĉi tie, diabloj, stultuloj, ŝtipkapuloj! Estas dirite al vi: ĉi domon jam hodiaŭ transdoni al subadmiralo Ievlev kun infanoj kaj hejmanoj...

La preobraĵenskanoj detrenis la princinon, sed ŝi plu ŝrikis, kaj ŝiajn neelteneblajn kriojn Maria Nikitiŝna ankoraŭ longe aŭdis en la domo, kiam ŝi jam aliĝis al la kapo de la lito, sur kiu estis dormetanta Silvestro Petroviĉ...

Finfine ektondris radoj de la ĉaroj, forveturigantaj en malproksiman ekzilon la familion de princo Prozorovskij, ekknaris la fermata pordego, kaj poste — en silento — longe kaj facile suspiris Ievlev. Maria Nikitiŝna, starante ĉe la lito sur la genuoj, mallaŭte kaj feliĉe plorante, per etaj kisoj kovradis la kaviĝintan vangon, la maldikan manon, la palan tempion de la edzo. Li ankoraŭ suspiris en dormeto, poste malfermis la okulojn, ĝoje diris:

— Manjo? Mi kvazaŭ aŭdis, sed ĉiam pensis — mi sonĝas.

Ŝi ne respondis — rapidaj etaj larmoj estis gutantaj sur lian manon.

— Lasu, — petis li. — Nun la tuta malfeliĉo estas for...

Kaj subite demandis:

— Kiu ĉi tie ŝajne ĉiam kriis? Ĉiam kriis kaj ŝrikis, ĉu?

El la pordo, bruligante la pipon, malmilde respondis Menŝikov:

— Tio de la maliculo via — Prozorovskij — la familion oni en ekzilon forveturigis. Laŭmerite al tiu kanajlaro!

— Laŭmerite? — levetiĝante sur la kubuto, demandis Ievlev. — Por ili do kial laŭmerite? Por tiuj stultaj inoj kaj fraŭlinoj, pro kio al ili ekzilo kaj mallibero?

Menŝikov respondis ne tuj, per morna voĉo:

— Tiele ni vivas, Silvestro! Ĉi tie ne indas rezoni, nur perturbo en la cerbo povas fariĝi. Tiela estas nia... kutimo! Li vin ne voris kun la familio — nun pagas...

Kaj, fermante post si la pordon, konsilis:

— Ne maltrankviligu la kapon. Dormu, sinjoro subadmiralo...

Sed neniu en tiu stranga mateno povis ekdormi en la grandega vojevoda domo. De tempo al tempo aŭdiĝadis voĉoj el la manĝohalo, venis Apraksin, kun li Golovin, ili postulis tuj Manjon Ievleva-n, postulis rigardi la filinojn — kiaj elkreskis belulinoj, postulis manĝon, drinkon, gajon pro la okazo, de ĉiuj sciata. Apenaŭ Maria Nikitiŝna eliris kun nearanĝitaj haroj, apenaŭ la vojevoda servistaro, timanta la novajn mastrojn, ekportis manĝaĵojn kaj vinojn, en la korto ektondris feritaj radoj de kaleŝo, kaj eminenco Atanazio, malforte movante siajn ŝvelintajn krurojn, eniris en la vestiblon. Oni sidigis lin en

fotelon, li verŝis por si mem en kalikon malvazion, diris al Ievlev:

— Ne je via sano, kapitan-komodoro...

Menŝikov korektis:

— Subadmiralo, mastro...

— Por mi tio estas tutegala! Ne je via sano, Silvestro! Je la via oni ankoraŭ ne unu kaj ne du fojojn kalikojn levos...

Li paŭzis, ĉirkaŭigis ĉiujn per sia fiksa kaj severa rigardo, diris trankvile:

— Je tio mi ĉi kalikon levas, ke ne finiĝis kaj ne finiĝos sur la rusa tero homoj, kiuj, neniun timante, pro siaj fidelaj amikoj, ne domaĝante sin, diros la plej necesan vorton. Je via sano, Teodoro Matejeviĉ, je via, Aleksandro Daniloviĉ!

Atanazio lipis la vinon, demandis Menŝikov-on:

— Kial vi dentomontras, sinjoro leŭtenanto?

— Ja tial, — kun subrido respondis Menŝikov, — tial mi, mastro, ridas, ke malĝuste vi diras. Mi malkuraĝulo neniam estis, tion vi ĉiuj scias, sed tion ĉi mi timas. Timas, patro, treege timas, kaj ne morton, diablo kun ĝi, ni ĉiuj mortos, sed timon mi timas — mian timon, kiam oni trenos al la princo-cezaro, kaj ekgrincos li per la dentoj, kaj pleniĝos de sango, kaj montros ŝtatan knuton, kaj torturiston Joĉjon, kaj puŝos al la dorso en direkto de la pendigilo. Vi, mastro, el Ĥolmogoro ne vidas, sed ni, proksimuloj, scias, kiele sub torturo homo povas esti konsternita. Ne timante! Tute ne, patro! Okazas, mi tuta per ŝvito kovriĝas, ĝis el mi tiun plej necesan vorton mi elpremas. Kaj atendas! Kaj se al vi pro tiu vorto...

Grafo Teodoro Aleksejeviĉ Golovin ekrigardis al Menŝikov el sub la frunto per siaj etaj, divenemaj, penetre saĝaj okuloj, balancis la kapon:

— Lasu, Aleksandro Daniloviĉ! Malĝustatempaj estas ĉi paroloj! Farite — kaj dankon al Dio, kaj la pravajn vortojn la eminenco diris! Je via sano mi drinkas!

Silvestro Petroviĉ, ĝis tiam silentinta en sia fotelo, demandis:

— Respondu, Teodoro Matejeviĉ: ĉu pensis vi pri mi, ke mi estas perfidulo kaj latrono? Ne ĉiam, ne matene, sed ĉu subite — nokte — ne okazis? Ne venadis en la kapon penso: eble, vere Ievlev estas transfuĝulo — al la svedoj transiris, nin ĉiujn trompis? Ĉu neniam vi tiel pensis? Eĉ ne unu fojon?

Apraksin kun pigra subrido forsvingis:

— Sensencaĵon vi diras, sinjoro subadmiralo!

— Tamen ne sensencaĵon. Sidante en la prizono, dum tagoj kaj noktoj pensadis mi: ĉu vere ili kredas al tiu kalumnio, al la fia denunco kontraŭ mi? Ĉu inter si en Moskvo aŭ en la Voroneĵaj ŝipkonstruejoj oni diras: ne vidis ni, kia estis Silvestro. Ne vidis la serpenton! Kaj ankoraŭ pensadis mi ofte: ĉu vere li mem, kun kiu pasis tuta nia juneco, kun kiu ni la ludajn ŝipojn sur la Perejaslavla lago faradis, kun kiu al Azovo dufoje iradis, kun kiu la Narvan malfeliĉon travivis, ĉu vere li...

Golovin frapis la tablon per la polmo, severe interrompis:

— Sufiĉas, sinjoro subadmiralo! Pri tiu temo ni ne parolu! Al nenio bona kondukos nin tia konversacio...

Silvestro Petroviĉ suspiris, eksilentis por longe, poste foriris

en la dormoĉambron. Maria Nikitiŝna ekiris post li — li plendis:

— Malfortas mi, Manjo, ankoraŭ...

Ŝi eksidis apud li, li prenis ŝian manon, preskaŭ flustre diris:

— Estas malfacile iel...

— Sed kio estas malfacila do? — ekkriis ŝi. — Kio, Silveĉjo, kio, se vi nun estas kaj heroo, kaj subadmiralo...

Li ĵetis al Maria Nikitiŝna ian alian, novan rigardon — eksilentis kaj ne plu plendis al ŝi.

Poste Teodoro Matejeviĉ, konsolante ŝin, diris:

— Malfacile al li estas, Manjo, estas pezo sur lia kompatinda animo. Kiel ne kompreni? Subite bolas la honesta sango, ne povas li regi sin. Kaj vere — kiel tio estis? Pro gloro kaj heroaĵo veraj estis ambaŭ prenitaj en malliberejon, en prizonon, sub areston, por torturoj kaj malhonoro — de kiu? Estas terure pensi! Atendu, Manjo, tio kun paso de tempo foriros. Ripozos Silvestro Petroviĉ, degelos la prizona glacio en lia koro. Kaj vi, Manjo, ne afliktiĝu! Aferoj por vi estas nun, vidu, abundaj: la filinoj, la edzo admiralo, la gastoj, la vojevoda bieno, preskaŭ la tuta Ĉedvina lando venas por riverenci. Do en la aferoj forpasos tiu malgaja tempo...

Da klopodoj vere estis multege: en plej malsama tempo subite aperadis Petro, malsata, laca, avide manĝadis, serĉadis, kie dormi en malvarmeto; satdorminte, li ree malaperadis en la ŝipkonstruejoj, en la fortreso, en la Kanona korto. Ĉiuj sekvantaranoj — de la plej altaj ĝis la eta popolo — strebis esti pli proksime al la vojevoda domo: pli ofte necesis trafi antaŭ la okulojn de Petro en penoj, por ke li ne forgesu. Kun Maria

Nikitiŝna kaj kun Ievlev Petro Aleksejeviĉ estis speciale afabla, pro tio la vojevodan bienon oni kutimiĝis viziti kun riverencoj. Maria Nikitiŝna kaj koleris, kaj plaĉis al ŝi tio: venadis kaj alveturadis multaj — kaj komercistoj, kaj popoj, kaj prioroj de najbaraj monaĥejoj, kaj iuj flatemaj, elturniĝemaj, tute nekonataj homoj el Ustjugo, Mezeno, Vologdo. En la korto ĉiam ĉeestis la kancelarianoj — ĝuste tiuj, kiuj tute antaŭ nelonge turmentis ŝin kaj torturis per demandoj pri Silvestro Petroviĉ. Foje ŝi plendis pri ili al Menŝikov; tiu subridis, montrante la blankajn kiel akva ŝaŭmo, densajn dentojn, skuis la buklan perukon, diris:

— Kia vi, Maria Nikitiŝna, estas postulema. Ĉiuj, kara mia, estas ne sen peko. Estis ordonite al ili fari — kaj ili faris, nun alia vento blovas — ili kaĵolas. Laŭ vi, ankaŭ nin ĉiujn per skurĝoj dispeli endus. Homoj estas homoj, kaj pro tio pardonu ilin.

— Ili estas ŝteluloj, koruptuloj, latronoj! — en eksciteco diris Maria Nikitiŝna. — Tion ĉiuj scias...

— Sed ĉu vi honestan kancelarianon vidis? — kolerante, demandis Menŝikov. — Se vi konas, nomu, mi lin al Petro Aleksejeviĉ montros, — li, eble, tian monstron faros feldmarŝalo...

Maria Nikitiŝna svingis la manon, foriris. Longe en tiu vespero ŝi iradis el halo en halon, rekonadis ĉambrojn kaj ĉambretojn, vestiblojn kaj ŝtuparojn — ĉiujn tiujn lokojn, en kiuj sonore frapadis la kalkanumoj de ŝiaj botoj en tiuj foraj jaroj, kiam ŝi venis al la edzo en Arĥangelskon unuafoje. Jen ĉi tie, ĝuste en tiu ĉi ĉambro, Silvestro Petroviĉ iam detiris de ŝi peltmantelojn kaj diris, ke ŝi estas envolvita, kiel brasiko. Kaj

ĉi tie staris ĉe la tiama vojevodo Apraksin kupra globuso, la planko ĉi tie estis kovrita per blankaj ursaj feloj, ĉi tie ili tagmanĝadis, longe sidante ĉe la tablo. Kiel kviete estis tiam, kiel varme, kiel trankvile en la koro. Fajfas trans la muroj neĝvento, Manjo ekdormetas ĉe la varmega forno, kaj la viroj fumas siajn pipojn kaj parolas pri la aferoj...

Ŝi iradis tra la vojevoda domo, kaj post ŝi sensone moviĝis la vojevoda servistaro — vartistinoj, nutristinoj, la ĉefservisto, ĉambristinoj, maljuna ŝlosistino, la nano kaj nanino, — ĉiuj estis pretaj, ĉiuj atendis ŝian ordonon, ŝian vorton, ŝian rigardon, kiel ankoraŭ tute antaŭ nelonge atendis rigardon kaj vorton de vojevodo Rĵevskij...

Ĉiuj ĉi homoj nun timis ŝin, kaj ŝi kaj hontis, kaj abomenis, kaj timis.

— Nenion mi bezonas! — diris ŝi subite laŭte per voĉo, en kiu aŭdiĝis larmoj. — Iru for, mi vokos, se estos afero...

Kiam ŝi revenis en la dormoĉambron, Silvestro Petroviĉ senmove kuŝis sur la dorso, per la profunde kaviĝintaj okuloj estis malmilde rigardanta antaŭ si, al fajreto de lampo. Ŝi plendis al li, ke ŝi laciĝis, ke estas maltrankvile al ŝi nun en tiu ĉi fremda domo, ke estas malfacile al ŝi pro kaĵolaj rigardoj de la servistaro, ke estus bone reveni al Rjabov-oj en Muskojn. Li kun malgaja rideto riproĉe diris:

— Sed vi mem eĉ unu fojon tie ne estis.

— Sed kiam, Silveĉjo...

— Vi trovus tempon, se vere necesus...

Maria Nikitiŝna silentis: ŝi trovus tempon — certe, tiel, tamen estis malfacile iri tien nun, de la maltrankvila, sed tia

bonstata kaj honora loĝado ĉi tie, en la vojevoda domo. Kaj Silvestro Petroviĉ, kvazaŭ legante ŝiajn pensojn, diris:

— Ja vere estis dirite: vantaĵo de vantaĵo...

— Jam morgaŭ mi iros, nepre iros! — ekkriis Maria Nikitiŝna.

Sed ankaŭ morgaŭ ŝi ne iris, ne iris ankaŭ postmorgaŭ.

Silvestro Petroviĉ nun longe sidadis sub longbranĉa piceo en la vojevoda ĝardeno, kie oni metis nun por li fotelon, por ne lacigu lin brua kaj konstanta vanta tumulto de la palaco. Ĉi tie, penseme mallarĝigante la okulojn, li foliumadis Neŭtonan verkon pri sferoj, ludadis kun la filinoj, malgaje kaj koncentrite meditadis. El ĉi tie li sendis por Rjabov matroson kaj ĝissate ridis, aŭskultante rakonton de la piloto pri la festeno, primetita por Petro, pri tio, kiel li fordiboĉis la tutan donacitan de la caro monon kaj kiel nur en Solombalo trovis li, Ivano Sabateiĉ, kvin kopekojn por refreŝiga drinko. Ili konversaciis longe, la piloto same estis pensema, ĉiam fiksrigardis Ievlev-on, kvazaŭ serĉis en li ion kaj ne povis trovi, poste kun riproĉo balancis la kapon:

— Kaj vere, sufiĉas jam al vi, Silvestro Petroviĉ!

— Kio sufiĉas? — komprenante la sencon de la vortoj de Rjabov kaj ĝojante pri tio, ke la rudristo divenas ĉion okazantan en lia animo, demandis Silvestro Petroviĉ. — Pri kio vi parolas? Kio sufiĉas?

— Mi diras: sufiĉas, — kaj finite! — ripetis la piloto. — Vi scias, troajn vortojn ja babili ne indas!

Kaj li abrupte ŝanĝis la konversacion, demandinte, ĉu estas kontenta Maria Nikitiŝna pri la vojevoda domo. Ievlev ĵetis rigardon super la ŝultro al la servistaro, kiu impetadis jen en la

glacitenejon, jen en la kuirejon, jen en la kelon, al koĉeroj, kiuj kverelis apud siaj kaleŝoj, al la Menŝikov-aj kuristoj, kiuj dormis en malvarmeto apud la palisbarilo, suspiris, diris, ke ŝi estas kontenta, ĉiam intencas iri al Muskoj, sed neniel povas trovi liberan tempon...

— Nun ŝi havas multajn klopodojn! — konfirmis Rjabov.

— Ŝi mastrumas...

— La domego estas nemalbona!

— Kaj kial Taisja Antipovna nin ne vizitu? — demandis Ievlev. — Ŝi povus veni...

— Ŝi ne venos!

— Kial do?

— Sed kiel ŝi venu, sinjoro subadmiralo? Ĉu tra la malantaŭa perono?

Ievlev kuntiris la brovojn, diris kolere:

— Por kio do tra la malantaŭa?

— Sed ja tra la alia, la bojara, la servistaro ne enlasos! — diris Rjabov. — Fiŝista edzino, kaj kun princoj, kun grafoj...

Li subridis bonanime, aldonis:

— Tio estus negrava, kaj Dio estu kun ĝi, sed Ivano mia Ivanoviĉ ĉiam intencis al vi gasti veni, al la fraŭlinoj, en la vojevodan domon...

— Ĉu intencis? Do kio malhelpas? — vigle diris Ievlev. — Vi, frato, Ivano Sabateiĉ, prenu kaj konduku. Do... li venos, vizitos ilin Ivaĉjo, ili ludos... Vi ne dubu...

Dum Ievlev parolis, la rudristo rigardis al li de supre

malsupren — kvazaŭ kun bedaŭro, poste adiaŭis kaj diris rezolute:

— Ne, mi ne kondukos! Ne povas li tra la malantaŭa perono, ne tia li knabo elkreskis. Alta nun estas via domo, kaj por ni dume ankaŭ en la propra domo ne estas malvaste. Do vi ne koleru, Silvestro Petroviĉ...

Li foriris senhaste, rigardante al ĉiuj flankoj kun bonkora subrido, per nenio ofendita, tia fiera en la koro, ke Ievlev subite pasie enviis al tiu fortega animo.

Dum du sinsekvaj tagoj caro Petro venigadis en la vojevodan domon al Maria Nikitiŝna por tagmanĝoj fremdlandanojn — malnovajn kaj malbonajn konatojn de Ievlev kun konsulo Martus ĉekape. La tagmanĝoj estis pompaj, longaj, kun tostoj je sano, multaj pladŝanĝoj kaj paroloj. En la globaj or-brunaj okuloj de la caro briladis kaj estingiĝadis fajreroj; li, hirtigante la lipharojn, longe paroladis pri Dio, pri mondaj pekoj kaj pri tio, ke laŭ ekzemplo de patroj kaj avoj li intencas nun plenumi iun antikvan piaĵon: forirante de vantaĵoj, firme decidis li direkti sin al la Solovkiaj insuloj en tiean sanktan klostron, por danki sanktulojn Zosimon kaj Sabation pro savo de urbo Arĥangelsko de la sveda invado. La fremdlandanoj interrigardadis, kapjesadis, laŭdadis la saĝan caran decidon, sed al Silvestro Petroviĉ ĉiam ŝajnis, ke la caro ridas kaj ke nun li jam alie parolas kun fremdlandanoj, ol en tiuj jaroj, kiam ĉiu alveturinta el trans la maro homo ŝajnis jam kaj honesta, kaj lerta, kaj saĝa, kaj fidela al lia cara afero. Kaj drinkis kun fremdlandanoj Petro multe malpli, ol antaŭe — en la juneco, kaj nesingardan vorton de li Ievlev ne aŭdis eĉ unu. La antaŭaj estis la laŭta rido, kaj la subite tikanta vango, kaj la

maniero dolore frapi kunparolanton per la polmo al la ŝultro...

Kaj kiam, tagmanĝinte duan fojon, la fremdlandanoj, kondukataj de konsulo Martus, foriris sur gajaj piedoj, Petro subite diris:

— Ne disiru, sinjoroj konsilio, ni konversacios inter ni, laciĝis mi hodiaŭ kun ĉi latronoj kaj spionoj...

La malbutonis la kaftanon, verŝis al ĉiuj en kalikojn hungaran vinon, kiu restis ankoraŭ en la kelo de Prozorovskij, lipis, per milda nekutima voĉo prononcis:

— Rememoros vi min, je Dio, mi ĝuste diras: jam hodiaŭ ili al siaj regantoj per kriptaĵo skribos, ke rusa caro Petro, lia sanktoleita moŝto, por jaro al Solovkio foriris.

Kaj li ĵetis ruzan rigardon al Apraksin:

— Kaj kiel vi ĝojas kun Silvestro, ĝojegas! Vi, vi pravas, ĉi-foje vi, sed kion do fari? Ĉu entute sen fremdlandanoj? Laŭ la antikva ekzemplo, ĉu?

Li metis sian grandegan, en peĉo kaj fulgo, polmon sur la ŝultron de Ievlev, premis kun karesa forto, ekrigardis en la okulojn de Silvestro Petroviĉ kaj tuj kun suspiro forturniĝis al la aliaj. Estis videble, ke lin ion maltrankviligas hodiaŭ kaj li deziras paroli, sed ne scias, kiel komenci konversacion. Poste li ekstaris, paŝis apud la tablo, tusetante diris:

— Homo honesta kaj racia, trovinta ion malutilan aŭ elpensinta ion utilan, ĉu ne povas diri al mi rekte, sen timo? Kial vi silentas? Aŭ vi ne estas atestantoj de tio? Utilaĵon mi ĝojas aŭdi de ajnulo! «Tirano, tirano» — legis mi antaŭ nelonge pri tio en fremdlanda gazeto! Sed ĉu konas ili ĉiujn miajn cirkonstancojn? Malbondezirantoj miaj eternaj

malkontentas pri mi, tio estas vero, sed ĉu mi bezonas laŭdojn de ĉi kanajloj? Malklereco kaj obstino ĉiam batalis kontraŭ mi, kiam mi ekintencis ŝanĝojn enkonduki kaj la morojn korekti. Jen kiuj estas tiranoj, sed ne mi! Kial vi silentas, malkuraĝas? Ĉu mi pligravigas sklavecon? Ĉu ne bridas mi arbitron de obstinuloj, ĉu ne moligas mi malmolajn korojn, ĉu mi agas kruele, instalante ordon inter militistoj kaj civiluloj? Maliculoj kalumniu, dum mia konscienco estas pura, kaj malpravajn onidirojn dispelos vento, — ĉu vere, Silvestro?

Ievlev levis la okulojn al Petro, streĉiĝis kaj respondis ne haste, per egala, nelaŭta voĉo:

— Al mi, Siro, vian demandon respondi estas malfacile. Mi ĵus el la prizono eliris, kie preskaŭ jaron mi kiel malliberulo ĉiuhore pendigilon atendis, aŭ ankoraŭ iun alian korektadon de moroj. Kaj pensadis mi tiel: por torturo preni militiston, sole pro denunco de maliculo, malamika al la ŝtato, apenaŭ al utilo konduki povas. Hodiaŭ min, morgaŭ Apraksin-on, poste Menŝikov-on, kun li Ŝeremetev-on kaj Repnin-on — por kiu tio utilas? Pendigilo kaj ŝtata knuto...

— Sufiĉas! — kriis Petro.

Al li malheliĝis la vizaĝo, tikis la vango, li deziris diri ion ankoraŭ, sed silentis kaj ree komencis iradi apud la muro el angulo en angulon. Tiel li iradis longe en peza silento, kunmetinte la manojn malantaŭ la dorso, ĝibetiĝinte, kiel ĉiam, kiam estis al li malfacile en la vivo. En la manĝohalo iĝis tute sensone.

Poste, abrupte levinte la kapon, Petro turniĝis kaj forveturis sur sian insulon sola, dormi en la palaco.

— La danĝero pasis! — mallaŭte diris Menŝikov kaj viŝis per la tablotuko ŝviton de la vizaĝo. — Nu, sinjoro subadmiralo, kian langon vi havas...

— Ĉu pasis? — demandis Golovin.

— Vere pasis! — ridetante diris Apraksin. — Kaj pasis, kaj por utilo Silvestro siajn vortojn diris.

Golovin suspiris, balancis la kapon:

— Dio volu tion!

Kaj tuj ĉiuj ekparolis, ekbruis; en ĉeesto de Petro hodiaŭ estis kvazaŭ sufoke, kaj sen li ekblovis freŝa vento.

Aleksandro Daniloviĉ, laŭte superante per la voĉo ĉiujn aliajn, parolis:

— Antaŭ nelonge li nin demandis — je Dio, mi krucosignas min, ke mi ne mensogas, — kion vi, fraĉjoj, hejme faras? Jen iras vi, li diras, iras vi, Aleksandro Daniloviĉ, hejmen. Kion vi tie faras, hejme? Kiel vi vivas sen laboro? Ĉu sidas kun krucitaj brakoj? Kaj tiam ĉeestis okaze la patro de Ŝein, bojaro, kaj li respondas: «Ĉu malmultas bezonoj, Siro, en la bieno, aferoj troviĝos». Kaj li, Petro Aleksejeviĉ, tiele kun enuo al la bojaro la okulojn movis: «Konas mi, li diras, viajn aferojn — vi ĉiam pri mi klaĉas»...

Estis io malgaja en tiu rakonto de Menŝikov, kaj eĉ pli amare iĝis en la koro de Silvestro Petroviĉ. Li tute kvietiĝis, mallevis la kapon kaj enpensiĝis, imagante, kiel en tiuj ĉi minutoj Petro, senfine skuante la buklojn kaj dentomontrante, etendas al la servosoldato la piedojn, por ke tiu detiru la botojn, kaj poste kuŝas sur sia mallarĝa, malmola lito, rigardas en mallumon per larĝe malfermitaj, postulantaj respondon okuloj

kaj demandas flustre:

— Kion fari? Kiel fari? Kiel?

Kaj respondo ne estas, nenia respondo. Ho Dio, estas facile juĝi, sed kiel fari tiun laboron, kiun surmetis sur siajn ŝultrojn Petro Aleksejeviĉ? Kiel?

Matene kun vizito al Silvestro Petroviĉ en la ĝardenon sub la longbranĉan piceon venis konsulo Martus. En elstare elegantaj esprimoj li diris, ke pro sia malbona posedo de la rusa lingvo li nur hodiaŭ eksciis pri la cara gratifiko al la kapitan-komodoro de la subadmirala rango, ke li esprimas al sinjoro Ievlev siajn plej sincerajn gratulojn kaj ĝojas pri tio, ke la fortuno favoris tian elstaran oficiron kaj eligis lin el la abismo de malhonoro, malfeliĉo kaj malgajo, por ĝojigi per la rango, per granda cara salajro kaj per agnosko de la heroeco...

— Pri kiuj malgajoj kaj malhonoroj kondolencas sinjoro konsulo? — interesiĝis Silvestro Petroviĉ.

Martus serĉis pli singardajn vortojn kaj klarigis, ke temas pri la meto de la brava sinjoro Ievlev sen ajna lia kulpo por longa tempo en malliberejon.

Ievlev rekte, sen palpebrumi, rigardis en la vizaĝon de la konsulo per sia peza, malbonkora rigardo. Martus riverencis dufoje. Silvestro Petroviĉ vidis, ke la frunto kaj la nazradiko de la konsulo kovriĝis per etaj gutoj de ŝvito.

— Kaj plue kion havas diri al mi sinjoro konsulo? — demandis Silvestro Petroviĉ.

Martus klarigis, ke transmare ekzistas en multaj lokoj kuracaj akvoj, kiuj tre povas helpi al la detruita sanstato de sinjoro subadmiralo. La Siro, lia sanktoleita moŝto, sendube

forliberigos sian gloran servanton por kuraco, kaj li, konsulo Martus, siaflanke skribos ĉien rekomendajn leterojn. Akvoj, sendube, faros grandan utilon al sinjoro subadmiralo kaj, ĉefe, redonos al li la antaŭan bonan animstaton.

— Ha, sinjoro konsulo zorgas pri mia bona animstato! — respondis Silvestro Petroviĉ. — Pro tio ni dankas. Kaj kio koncernas vizitadon de Marsaj[134] aŭ aliaj akvoj, do nun ni ne havas tempon. La tempo estas tia, ke en ĉiu tago povas neatendite okazi ia latronaĵo, ĉu ne? Do oni devas rigardi per ambaŭ okuloj...

La konsulo ankoraŭ foje riverencis, tenante la ĉapelon en la mano. Liaj okuloj estis konsternitaj: io eĉ timiga ŝajnis al li en tio, kiel aŭskultis la rusa subadmiralo la vortojn de kompato kaj kondolenco.

Vespere Silvestro Petroviĉ ne eliris al la tablo.

Ie malproksime aŭdiĝis gajaj kaj ebrietaj voĉoj de multe laborintaj dum la tago homoj, sed Silvestro Petroviĉ kuŝis sur sia malnova leda kuseno ĉe malfermita fenestro, rigardis al foraj bonaj steloj, suspiradis kun faciliĝo kaj pensis pri tio, ke la glacio en lia animo komencis degeli, ke estas kaj stulte kaj ridinde ofendiĝi en ĉi tera valo de malĝojo, des pli Arĥangelska, des pli sub vojevodo Prozorovskij, ke necesas fari la aferon, kiu tiom senfine abundas, ke eĉ ne estas sciate, kiel komenci.

---

134 Marsaj akvoj — arkaika nomo de ferohavaj mineralaj akvoj *(trad.)*.

5. Militiro estos!

Post kelkaj tagoj Silvestro Petroviĉ frumatene iris al la citadelo kaj pasigis tie en la malnova, kara, gajiganta la animon laboro multajn horojn seninterrompe. Post tagmanĝo ĉi tien venis ankaŭ la caro. Antaŭ la vespera aŭroro Petro sur la placo de la fortreso estis fosanta kavon, por planti betulon, kiun oni alveturigis de la Marka insulo. Estis vento, la betulo, kvazaŭ ĝojante pri tio, ke ĝiaj nudaj radikoj baldaŭ ree iros en grundon, kviete kaj feliĉe murmuris per la folioj. La matrosoj, alveturigintaj la arbon, silente staris ĉirkaŭ Petro Aleksejeviĉ. La caro, saltinte en la kavon, per fortaj movoj elĵetadis el tie per ŝpato grundon. Pro la laboro liaj vangoj ruĝiĝis, la okuloj hele brilis, la ĉemizo sur la flankoj kaj la skapoloj malsekiĝis pro ŝvito.

Elĵetinte supren la ŝpaton, li etendis la grandan raspan, ne caran manon al Semisadov, apogiĝis per la pinto de la boto al la muro de la kavo kaj ordonis:

— Tiru, ferdekestro!

Semisadov ekstaris pli firme, ektiris, sed la ligna kruro glitis, kaj la ferdekestro mem preskaŭ falis malsupren. Petro base ekridegis, ekridis ankaŭ la matrosoj. Semisadov ofendiĝis, diris kolere:

— Jen, ridas! Tiru, provu, se li mem tiel ŝiris...

Petro etendis la alian manon, depuŝiĝis, ŝanceliĝante ekstaris sur la randon de la kavo. La Dvina vento distaŭzis liajn harojn, blovplenigis la ĉemizon. La matrosoj lerte levis la arbon, ekportis ĝin al la kavo per la radikoj antaŭen. Silvestro Petroviĉ, apogante sin al la lambastono, aliris pli proksime, per

la bastono ŝovis radikon, por ke ili ne ŝiru ĝin. Petro ordonis:

— Deiru, Silvestro, ne malhelpu pro Dio, ili premvundos viajn piedojn, ĉu vi vidas, kiaj ili estas ursoj...

Kaj, dispuŝinte la matrosojn, li mem prenis en la manojn la blankan trunkon de la arbo, iom tenis ĝin pendanta kaj vertikale mallevis en la kavon. Per ses ŝpatoj, lerte, laŭvice, ili komencis ĵeti nigran, humidan grundon.

— Por ke ĝi elkresku, kaj de la maro estu videbla por ŝipanoj — la bordo, Rusio, — surmetante la kaftanon, diris Petro. — Ĉu ĝi estos videbla aŭ ne, Silvestro?

— Estos, Siro, sed ne nun! — penseme respondis Ievlev. — Kiam ĝi elkreskos super la citadelo. Ne baldaŭ, mi pensas! Ni ne vidos...

— Ni multon ne vidos, — same penseme prononcis Petro. — Rudristo Rjabov kiam la svedan flagŝipon estis surgrundiganta, ne esperis la viktorion mem vidi, sed tamen sian heroaĵon faris...

Silvestro Petroviĉ subite ridetis.

— Pri kio vi ridas? — miris Petro.

— Antaŭ nelonge, kiam ĉi unua piloto vin, Siro, regalis, ŝajne vi, levinte je lia sano kalikon, nomis lian agon inda je Publio Horacio Kokleso[135]...

Petro kapjesis:

---

135 Publius Horatius Cocles — legenda Romia heroo, kvazaŭ vivinta en la 6-a jarcento a.n.e. kaj defendinta, laŭ Plutarĥo, la fostoponton super Tibero, retenante sola la malamikojn, ĝis liaj kamaradoj rompis la ponton malantaŭ li, post kio li transnaĝis la riveron kaj eliris sur la kontraŭan bordon.

— Nu, nomis...

— Kaj pri ĉi Publio Kokleso Rjabov estas tute senscia. Kaj la ceteraj dvinanoj ne scias. Tre afliktiĝis la rudristo...

La caro ekridis:

— Ĉu li opiniis insulto?

Ievlev, same ridante, klarigis:

— Prefere, li diris, vi en nia maniero dirus, sed ne Pupo! Kia tia Pupo? Nun, li diras, infanoj krias: pupo glacia, pupo glacia!

Petro Aleksejeviĉ laŭte ekridegis:

— Jam hodiaŭ mi en ĉies ĉeesto klarigos, kio estas tiu Pupo...

Kaj kriis al Semisadov:

— Akvon, ferdekestro, ne avaru...

La betulo sur la placo jam estis bruanta per sia sukoplena helverda foliaro, kvazaŭ staris ĉi tie jam dum jarcento. La caro demandis:

— Ĉu al vi estas malfacile ĝis la tombejo iri, aŭ vi sukcesos?..

Gardistoj malfermis antaŭ Petro kaj Silvestro Petroviĉ la feran pordeton. Ĉi tie, ekster la fortresaj remparoj, vento fajfadis pli laŭte, sur Dvino kuris blankaj ŝaŭmaj ondokrestoj. Dum ili iris al la tombejo kaj inter la tomboj, la kapitan-komodoro rakontis:

— Multo, granda ŝipestro, se ne ĉio, kion eksciadis ni pri la latronaj planoj, estis transdonata al ni de ĉi glora Jakobo. Ne domaĝante sian vivon, la forpasinto faradis por la patrujo, ne

pro timo, sed konscience, pli ol homo povas. Kaŝaj leteroj liaj al vi estas konataj: ĉio en ili estis pura vero. Sur la sveda flagŝipo en la lastaj minutoj li impetis defendi nian rudriston, kaj ĉi tie estis vundita morte...

Petro, atente aŭskultante, eksidis sur benkon apud nealta tombomonteto, kapjesis, por ke Ievlev parolu plu. Silvestro Petroviĉ estis ankoraŭ malforta, lia voĉo rompiĝadis:

— En amuleto sur la kolo havis ĉi glorinda viro pinĉaĵon da rusa tero; tiel rakontis li al mi en la lastaj horoj de sia vivo. Tiun teron prenis lia patrino. Kaj en Kolivano...

Silvestro Petroviĉ sufokiĝis, silentis iom. Petro sidis forturniĝinte, tiel, ke Ievlev ne vidu lian vizaĝon.

— Kaj en Kolivano ĉi amuleton li prenis el la mano de la patrino, kuŝanta sur mortolito.

Ievlev malbutonis la kaftanon, demetis de la kolo la amuleton sur arĝenta malheliĝinta ĉeneto, etendis ĝin al Petro. Petro longe silentis, poste per mallaŭta voĉo petis:

— Vi rememoru, kion la forpasinto deziris, ĉion rememoru — lia volo estas sankta...

Silvestro Petroviĉ rakontis pri Ĥilkov. Petro kapjesis:

— Inda viro. Kion eblas — mi ordonos, oni faros. Kun gardo necesas, por al li mem ne malutili. Frato nia reĝo Karolo nun estas forte kolera, kaj, ni pensas, ankoraŭ pli kolera en baldaŭaj tempoj iĝos. Ĥilkov estas en lia potenco, li elverŝos sian koleron sur lin...

Li leviĝis de la benko, korektis la krucon sur la tombo de Jakobo, per la bota plandumo alpremis la teron. Ievlev elprenis

el la poŝo paperan folion, malfaldis.

— Kio estas tie? — demandis Petro.

— Tion Jakobo kun si alveturigis por via moŝto, granda ŝipestro. Mi ne bone komprenis, de kie ĝi estis prenita, la papero estis tute malseka, inko ne ĉie konserviĝis. Sveda reĝo Gustavo-Adolfo ŝajne antaŭ cent jaroj skribis...

— Legu! — plu alpremante la teron, ordonis Petro.

— «Keksholmo, Noteburgo, Jamo, Koporjo, Oreŝko, Ivangorodo, — legis Ievlev, — konsistigas ŝlosilojn de Livonio kaj baras la Baltan maron disde Rusio. Se redoni al ĝi Noteburgon aŭ Ivangorodon aŭ ambaŭ urbojn kune, kaj se Rusio konjektus la propran forton, tiam proksimeco de la maro, riveroj kaj lagoj, kiujn ĝi ankoraŭ ne taksis, donus al ĝi eblon, danke al ĝiaj grandegaj rimedoj kaj nemezurebleco de ĝiaj limoj, kovri la Baltan maron per siaj ŝipoj, tiel ke Svedio troviĝus en danĝero...»

Petro, metinte la manon sur la krucon, aŭskultis, movadis la malhelajn brovojn. Liaj brunaj okuloj estis ridantaj.

— Jen, kapo! — diris li gaje. — Kial do antaŭe vi ne legis ĉi folion?

— Mi ne havis ĝin en Arĥangelsko. Ĉi tie ĝi estis, en la citadelo, kaj kiam oni min el ĉi tie per la vojevoda ukazo en la malliberejon trenis, tiam la folio ĉi tie restis...

Petro, ne aŭskultante, interrompis:

— Multe saĝa estis ĉi Gustavo-Adolfo. Sed Karolo, frato nia, eĉ ne zorgigis sin pensi, pri kio Gustavo-Adolfo antaŭ cent jaroj ĉagreniĝis.

Silvestro Petroviĉ silente rigardis al Petro. Tiu elprenis el la brusta poŝo pipon kaj tabaksaketon, elbatis fajron, forte enspiris aroman fortan tabakfumon, demandis:

— Ĉu vi kredas, sinjoro subadmiralo, ke la svedoj en la nuna jaro ree venos en la urbon Arĥangelskon?

— Mi ne tro kredas, granda ŝipestro.

— Vi prave ne kredas. Probable, eĉ nun ili pro tiu sia vizito sin gratas, kial do ŝoviĝi. Ne, ne estos ili nun...

Li silentis iom kaj severe aldonis:

— Mi havas ekzaktan informon — ne venos al ni la svedoj.

Ievlev mirege rigardis al Petro.

— Ĉu vi pensas, por kio do mi ĉi tie tempon pasigas? Por kio en la maron mi eliras, per lorno rigardas, ordonas la svedon atendi?

Li ekridis, kontenta pro la miro de Silvestro Petroviĉ.

— Ja por tio, sinjoro subadmiralo, ke mi per ĉi ruzaĵo trompas fraton mian Karolon. Li pensu, kvazaŭ ni estas facile trompeblaj. Li ĝoju, ke ni kvazaŭ ĉiujn niajn fortojn ĉi tie tenas, kaj senĉese lian floton al si atendas, en ega maltrankvilo nokte kaj tage vivas. Kaj li same pensu, ke iun intencon nian ni tute forlasis.

— Kian intencon?

— Tian, ke en la pasinta vintro intencis ni la fortreson Noteburgon, nian originan Oreŝkon, de frato Karolo preni batale, sed glacio malfrue aperis, ne povis niaj trupoj per sledoj la lokon atingi, kaj ĉi tasko estis prokrastita, kaj nun ni ĉi tie kvazaŭ la svedon atendas en timo... Konfuzi lin necesas...

Rigardante malproksimen, al Dvino, li ekparolis malrapide:

— Ni ankoraŭ ĉi tie estos iom, kaj poste al la Solovkiaj insuloj direktos nin por preĝi al sanktaj Zosimo kaj Sabatio. Ĉiuj ŝipoj, kiuj estis ĉi tie konstruitaj, kun ni iros, kaj sur tiuj ŝipoj — da soldatoj kvar mil kaj da matrosoj, kiom ni kolektos, kanonoj bonaj, rezervo pulva. Kaj ankoraŭ iros kun ni du malpezaj fregatoj, kiujn eblus treni sur seka vojo — sur ruliloj kaj glitiloj...

Silvestro Petroviĉ aĥis, sur lia maldikiĝinta vizaĝo aperis malforta ruĝo.

— Ĉu vi komprenis? Do spionoj kaj gvatantoj laŭ Dia volo kaj ruzo al frato Karolo skribu, kiel ni en preĝoj estadas kaj en Solovkio laŭ antikva moro faras animsavajn konversaciojn.

Petro ree eksidis apud Ievlev, per la tenilo de la pipo komencis desegni sur la tero de la tombomonteto la estontan vojon de la trupoj:

— Rigardu kun tuta atento: Solovkio!

Li desegnis rondeton.

— De ĉi tie, kiam la blankaj noktoj ĉesos, ni moviĝos al la Njuĥĉa salfarejo — jen ĝi, sur la bordo...

— Mi scias, Siro.

— Tien, ĉar vi estas ankoraŭ malsana, estis senditaj ne stultaj kampuloj — Hipato Muĥanov kaj Miĥaelo Ŝĉepotev, kaj por helpo al ili laborantoj de Solovkio, de la Suma insulo kaj de la Kema urbeto, de Vig-lago, kaj ankoraŭ Onegaj, Belozerskaj, Kargopolaj, — ĉiuj kun ĉevaloj. Da ĉaroj pli ol du mil. Tie kun plena sekreteco oni trahakas vojon en arbaro, faras

fasĉinojn, pontojn. Estas ordonite neniun laboranton forliberigi, ĝis nia armeo la batalon finos. Vidu plue, kiel ni iros: jen tra la marĉo al la Pul-lago... Ĉu ne forgesis vi nian antaŭlongan konversacion en Moskvo?

— Ne, Siro, ne forgesis.

— Jen! Nun venis tempo fari!

Petro desegnis rektan linion kaj trastrekis ĝin.

— Jen ĉi lago: ĝi flanke restos, dekstre. De tie al Voĵmosalmo. Ĉi tie ni niajn fregatojn surakvigos, kaj sur akvo laŭ Vig-lago — al rivero Vigo kaj al vilaĝo Talejkino. Riveretoj ĉi tie estas — Muroma, Mjagkozerska. Plue tra marĉoj kaj arbaroj — al Poveneco...

— Kaj denove — Noteburgo! — prononcis Ievlev.

— Noteburgo! — ripetis Petro. — Delonge tio estis intencita, kaj alie fari ni ne povas, Silvestro. Ni devas esperi al glora viktorio: Noteburgo-Oreŝko — la Balta maro!

Li akre ekrigardis en la okulojn al Ievlev, diris kun minaco:

— Eĉ unu animo ne sciu pri tiu entrepreno, kiel pri la tago de sia morto. Krom nia kompanio, neniu pri tio scias. Ĉu vi komprenis?

— Kaj la ŝipestroj, Siro, kiuj kun vi venis, — Pamburg kaj Varlan?

Petro longe fiksrigardis al Silvestro Petroviĉ, — estis videble, kiel ekbolas en li incitiĝo. Poste, reteninte sin, li respondis:

— Pamburg kaj Varlan estas ŝipestroj diligentaj kaj sian militistan devon ne forgesos.

Li ekstaris, ordonis seke:

— Ni iru, iĝas malvarmete...

Li ekiris antaŭen ne retrorigardante, incitite movante la ŝultron. Apud la pordeto li returniĝis, demandis postiĝintan Ievlev-on:

— Pamburg kaj Varlan! Ĉu ankaŭ ili por vi estas malbonaj? Apraksin-on kaj vin ne eblas kontentigi. Vi silentas, sed faras laŭ vi mem. Mi ja memoras, kiel por Krikov vi staris kiel muro kaj turo, ke fremdlandanoj lin molestas, sed Krikov ne estis simpla, Prozorovskij ne ĉion mensogas, io estas vero.

Kvazaŭ antaŭsentante malkonsenton, Petro paŝis al Ievlev renkonten, hirtigante la lipharojn, nelaŭte, sed kun obtuza, nesuperebla kolero en la voĉo prononcis:

— Pro tio, ke heroe pereis en honesta batalo kontraŭ la svedo via Krikov, ne ordonis mi lian spadon forigi el la preĝejo. Antaŭ nelonge rigardis mi pridemandajn foliojn — kun kiu li amikis: fuĝuloj de Azovo, ekspopoj — de monaĥo Dij amikoj, ribeluloj, pafistoj — hundinidoj, kiujn ekzekuta ŝtipo atendas, rabistoj, kiuj ĉe Volgo akiraĵon ĉasas...

Ievlev staris senmove, ne respondante, mallevinte la kapon, apogante sin sur la lambastono.

— Kvazaŭ al surdulo mi parolas! — diris Petro. — Kial vi silentas? Kion vi pensas?

Kaj jam sen kolero, sed kun malbonkora moko en la voĉo, li promesis:

— Se amikiĝus vi pli proksime kun ĉi Krikov, malbone vi,

Ievlev, finus. Jen por Tolstoj[136] la vivo ne estas ĝojo. Li estas saĝa, sed mi ja memoras. Ĉion memoras. Li servas nun fidele, sed mi ja ne estas forgesema. Nu? Kial vi silentas?

— Krikov forpasinta akceptis gloran morton! — kuraĝe rigardante en la globajn okulojn de la caro, respondis Silvestro Petroviĉ. — Mi ne estas juĝanto por li, same kiel ne estas juĝanto por tiuj, kiuj la svedojn venkis sur la Marka insulo. Plie mi nenion scias, pardonu...

— Dio pardonos! — kun morna subrido, forturniĝante de Ievlev, diris la caro. — Ni iru, ne estas frue, mi pensas!

Sur la citadela remparo ilin ambaŭ atendis inĝeniero Rezen — montri pafadon per novaj kanonoj.

— Komencu! — ordonis Petro.

La kanonoj pafis bone, kuglegoj kun ŝriko flugis super larĝa, plenakva Dvino, kanonistoj en novaj kaftanoj, rapidaj, lertaj, laboris vigle kaj gaje. La caro restis kontenta pri la pafado, laŭdis Rezen-on, ordonis la novajn kanonojn jam hodiaŭ urĝe meti sur ŝipon «Sanktaj Apostoloj». Rezen ne komprenis, por kio; Petro ne klarigis; larĝe paŝante, li ekiris al la kaptita sveda fregato, nomita nun «Fortuno». Sur la pobo kaj la mastoj de la nova ŝipo estis flirtantaj blankaj kun bluo flagoj de Sankta Andreo[137]. Matrosoj levis sur la ĉefmasto la caran standardon — flagon kun dukapa aglo, kiu en la bekoj havis

---

136 Petro Andrejeviĉ Tolstoj (1645–1729) — rusa ŝtata aganto kaj diplomato. Partoprenis en la pafista ribelo de 1682. Post fiasko de carino Sofia li transiris al la flanko de Petro, tamen tiu longe rilatis al li tre malfideme.

137 Flago de Sankta Andreo — poba flago de la Rusia floto: blanka tuko kun blua diagonala kruco; laŭ nomo de apostolo Andreo Unuevokita, laŭlegende krucumita sur oblikva kruco *(trad.)*.

bildojn de du maroj: la Blanka kaj la Kaspia, en la dekstra piedo — bildon de la Azova maro, la maldekstra piedo estis vaka.

— Rememoru la hodiaŭan konversacion! — diris la caro al Ievlev, kapmontrinte la standardon.

Ievlev fiksrigardis, komprenis. La caro plu rigardis al la standardo.

— Ni esperigas nin per felîca penso, ke îi alegorio baldaŭ estos ŝanĝita.

Petro leviĝis sur la pobferdekon, kie ĉe la stirrado sub vento estis pasumanta Rjabov, gaje kriis el malproksime:

— Saluton, rudristo!

— Saluton, Siro! — trankvile kaj afable respondis Rjabov.

— Debordiĝu! — ordonis la caro.

La matrosoj liberigis ŝnuregojn, ekfajfis ferdekstra fajfilo, ekkantis signala klariono. Rjabov movis la stirradon. Topmatrosoj ekkuris sur stajoj — hisi velojn. Petro, krucinte la manojn sur la brusto, per severaj okuloj rigardis al du fremdlandaj negocistaj ŝipoj, rapide kurantaj al Arĥangelsko. Poste, forakompaninte ilin per rigardo, pinĉante la malmolan lipharon, ordonis al Ievlev:

— Ekde îi tago mi ordonas al fremdlandaj ŝipanoj, kiam ili pasas preter la Novdvina citadelo, duonhisi ambaŭ topvelojn ĝis la mezo de la topmasto!

Li pensis iom kaj aldonis:

— Por memoro pri la okazinta îi tie super la svedoj viktorio!

6. Ni laboris bone!

— Al Solovkio baldaŭ mi iros preĝi! — diris Petro, starante ĉe la ŝultro de Rjabov.

La unua piloto singarde silentis.

— Danki Disinjoron pro la venko super la svedoj, preĝi al sanktaj Zosimo kaj Sabatio...

Rjabov nenion respondis.

— Vi iros kiel estro de eskadro kun ni! — per alia, afera voĉo prononcis Petro.

Ivano Sabateiĉ ĵetis rapidan rigardon al la caro.

— La eskadro estas nemalgranda, dek tri ŝipoj, kaj kun ili du fregatoj novaj: «Sankta Spirito» — sur ĝi ŝipestro estas Pamburg, kaj «Kuriero» — sur ĝi ŝipestro estas Varlan.

— Kaj super la eskadro kiu iros kiel admiralo?

— Apraksin Teodoro Matejeviĉ.

— Do, eblas! — trankvile rigardante antaŭen, al kovrita per ŝaŭmaj ondetoj Dvino, diris Rjabov. — Matrosojn nun vi, Siro, havas realajn; estis prave farite, ke pomorojn oni prenis sur viajn ŝipojn. La popolo estas kutima, ni ĝiskuros. Ĉu Ievlev Silvestro Petroviĉ kun ni iros?

— Kun ni.

— Kaj bone!

La fregato iris rapide. La observisto batadis al kupra sonorilo, por hazarde ne dronigi fiŝistan boateton. Rjabov,

mallarĝigante la okulojn, serĉadis konatajn signojn — kapelon, kubuton de la rivero, domon sur holmo. Petro nelaŭte demandis:

— Ĉu vi timis, kiam la svedan ŝipon kondukis, rudristo?

— Al la morto, kiel al la suno, per plenaj okuloj rigardi ne eblas, Siro! — respondis Rjabov. — Mi ĉiam pensis: mi ankoraŭ vivos, ne mortos. Ĝuste tiel fariĝis, mi vivas, tamen jen de vi favoraĵo — knaboj sur strato krias: «Pupo glacia, pupo glacia!»

La caro ekridis, klarigis:

— Ne pupo glacia, sed Publio Horacio Kokleso, romiano indega. Ĉi romiano unue kun Herminio kaj Larcio, kaj poste sola, defendadis ponton sur rivero Tibero kontraŭ etruskoj, ĝis la ponto malantaŭ li ne estis malkonstruita. Horacio tiam ĵetiĝis en la riveron... Romianoj poste starigis al li monumenton.

— Jen kiel! — diris Rjabov. — Granda afero... Kaj antaŭ kiom longe tio okazis?

— Antaŭ ĉirkaŭ mil jaroj, aŭ eĉ pli multe.

La rudristo fajfis.

— Ne ektimis do la viro! — diris li poste. — Same, probable, pensis: mi saviĝos...

De malantaŭe, frapante per la lambastono, al la stirrado aliris Silvestro Petroviĉ, diris, ke la horo estas malfrua, restis tempo ĝuste por sukcesi al surakvigo de la ŝipo en la ŝipkonstruejo, tie, probable, oni jam atendas. Malproksime jam brilis pintoj de Arĥangelskaj preĝejoj.

— Ĉu al la ŝipkonstruejo ni iru? — demandis Rjabov.

— Turnu al la ŝipkonstruejo! — ordonis Petro.

Ĥagajo Pustovojtov kriis en paroltubon komandajn vortojn, matrosoj vigle diskuris al siaj lokoj. Estis videbla la Solombala ŝipkonstruejo kaj la staranta apud ĝi ĉe la ankroj milita floto. En matena freŝa vento ŝvebis pobaj flagoj de sankta Andreo, sur la mastoj flirtis vimploj, matrosoj per siteloj priverŝadis la ferdekojn, de la ŝipoj aŭdiĝis kantado de klarionoj, krakado de tamburoj. Al Petro abrupte moviĝis la vango, li fiksrigardis la ŝipojn, puŝis Ievlev-on:

— Ĉu? Nenio direblas! Eskadro!

La fregato plenumis la manovron, komencis giri. Ree eksusuris la akvo post la pobo, vento abrupte ekfajfis en ŝnuroj. La ŝipoj de la eskadro estis kvazaŭ kreskantaj antaŭ la okuloj, iĝantaj pli grandaj, pli altaj, pli fortaj. Jam brilis sub la suno kupraj pruaj kaj pobaj kanonoj, jam videblis en malfermitaj paftruoj tuboj de pezaj kanonoj, jam aŭdeblis komandaj vortoj de ŝipestroj, elkurintaj sur la pobferdekojn, por vidi la caran fregaton.

— Ĉu bonaj ŝipoj? — per raŭka pro emocio voĉo demandis la caro Rjabov-on.

— Ni laboris bone! — respondis la rudristo. — Konstruis. Kaj al la svedo ne lasis bruligi, same laboris. Do jen ĝi estas — la floto!

Ĉapitro sepa

Ne palpebrumu — kaj ne estas timinde!
Proverbo

1. Nerompebla decido

Vekiĝinte ĉe la aŭroro, Ivaĉjo Rjabov frotpurigis per la pugnoj la okulojn, dufoje dolĉe oscedis kaj deziris dormi plu, sed subite rememoris sian nerompeblan decidon kaj tuj eksidis sur la benko, ektiminte tion, kion li mem fiksis por si.

Dum nelonga tempo meditinte kaj tute vekiĝinte, li ĉesis timi. Ĉio planita ree, kiel antaŭtage, imagiĝis al li nekomplika, simpla kaj facile plenumebla afero: necesis nur vesti sin kaj foriri el la korto. La patrino estis profunde dormanta. La patro, probable, foriris al sia floto. La orfoj de avinjo Eŭdoĥa, disetendinte sin, estis snufantaj sur la forno. Ivaĉjo singarde ekrigardis al ili: ili povis fiaskigi la tutan aferon — ili ĉiam sekvadis lin kaj ekploregadis, se li ilin forlasadis.

Ne, la orfoj dormis profunde.

Ivaĉjo vestis sin, singarde frapis per nova ferita kalkanumo al la planko, por pli oportune paŝi, ligis sur si zonon kaj, ne perdante tempon por serĉado de kombilo, per la fingroj kombis la buklajn harojn. Ĉar li estis dando kaj estis foriranta el la hejmo por longe, aŭ eble eĉ por ĉiam, li kunprenis ankaŭ kaftanon, antaŭ nelonge rekudritan el la patra. Nun restis nur elpreni el la subfornaĵo kaŝitan tie en la antaŭtago pakon. Tian pakon la patrino ordinare kolektadis por la patro, kiam li estis ironta en la maron, saman, prepariĝante al navigado, kolektis

por si ankaŭ Ivaĉjo. En la pako estis flanoj — unu mordita, alia tute netuŝita, bakita ovo, salo kaj kukumo, same mordita.

Penante ne brui, Ivaĉjo eliris kaj tuj sur la perono kunpuŝiĝis kun avinjo Eŭdoĥa, kiu tre miris, ekvidinte la knabon en tia frua tempo, kaj ankoraŭ pli multe miris, rimarkinte, ke en lia mano estas pako, kaj sur la ŝultroj — la nova kaftaneto.

— Kien do vi, viro, intencas iri? — demandis avinjo Eŭdoĥa. — Ĉu en la preĝejon?

Ivaĉjo pensis — li neniam respondadis tuj, — kuntiris la brovojn kaj diris, ke ne, ne en la preĝejon li intencas iri.

— Ne en la preĝejon — tiam kien do?

— Ja mi iros iomete promeni. Kial mi ne promenu?

— Promenu, promenu, bona afero!

Sur la vizaĝo de avinjo Eŭdoĥa aperis zorgoplena esprimo, kaj Ivaĉjo, divenante tion, kion tuj diros la avinjo, kolere palpebrumis.

— La orfoj, mi pensas, same povus kun vi...

— Sed por kio ili, nazmukuloj, kun mi! — plende ekparolis Ivaĉjo. — Mi jen kiom elkreskis, sed ili ankoraŭ eĉ iri bone ne povas. Ĉu bona promeno — porti ilin sur la dorso. Je Dio, avinjo, ili estas etaj, ili dormu...

Avinjo Eŭdoĥa konsentis, kaj Ivaĉjo ĉesis palpebrumi.

— Ĉu la ŝipojn vi rigardos?

— Kaj la ŝipojn mi rigardos. Ili hodiaŭ en la maron iros, lastan tagon sur Dvino...

— Iru, rigardu. Kaj la kaftanon portagmanĝan por kio vi

surmetis?

— Kial do mi estu sen kaftano? Ĉiuj estas en kaftanoj, sed mi en ĉemizo? Ĝi estis kudrita — do mi ĝin surmetis.

— En la pako do kio estas? — demandis la avinjo.

— Manĝo estas en la pako! — diris Ivaĉjo, per la verdaj okuloj rigardante al la maljunulino demalsupre.

— Jen, kia viro! — aprobis la avino. — Ankaŭ pri manĝo pensis. Por longe, verŝajne, intencas iri...

«Por ĉiam!» — deziris respondi Ivaĉjo, ne scipovanta mensogi, sed ĝustatempe mordis sian langon. La avino malligis la pakon, balancis la maljunan tremantan kapon, suspiris:

— Malmulte estos por vi, knabo, se vi ĝis la vespero ekiras. Vi pri manĝo emas — kiel la patro. Se vin ambaŭ manĝegemo kaptas, por la mastrino estos morto. Kaj la flano estas mordita. Atendu, kara, mi al vi bastokorbeton da kazeo metos kaj freŝan gadon...

Ivaĉjo eksidis sur la peronon, apogis sin per la pugno, malgajiĝis: «Ne plu estos mi ĉi tie, panjo ploros, avinjo turmentiĝos». Sed li tuj decidis firme: «Ne gravas! Ili ploros kaj ĉesos. Paĉjo estas kun mi, ni ne pereos, ankoraŭ donacojn mi alveturigos post tempopaso».

La avino elportis manĝon, ligis la pakon pli bone, per kombilo kombis al Ivaĉjo la buklojn, ankoraŭ donacis al li groŝon, — kial viro senmone promenu!

— Kiam vi manĝos — kvason trinku, — diris la avino, — homoj ĝuste diras: sata kokino eĉ lupon jungas. Iru kun Dio, kaj ne petolu kun aliaj knaboj, alie vi hazarde en akvon falos.

Ivaĉjo, malfermante la barilpordeton, respondis, kiel plenaĝulo:

— Se mi falos — mi eliros! Ne hakilo, ne dronos.

La maljunulino balancadis la kapon, miradis: ankoraŭ antaŭ nelonge li estis infaneto, kaj nun estas viro. Flugas, flugas tempo...

Kaj Ivaĉjo tiutempe estis aliranta la bienon de la vojevodo kaj forturniĝadis, por ke la Ievlev-aj fraŭlinoj — Venjo kaj Irenjo — ne povu pensi, kvazaŭ li ilin multe bezonas. Li ofte nun iradis laŭ tiu vojo, kaj li ĉiam forturnadis sin kaj ne rigardis al la alta palisbarilo, el trans kiu aŭdiĝadis laŭtaj voĉoj de oficiroj, princoj kaj aliaj sekvantaranoj, — la fraŭlinoj pri li eĉ ne rememoru, post tempopaso ili aŭdos tian, ke aĥos, sed estos malfrue, li tutegale al ili ne venos, ne tia li naskiĝis, ke li ofendojn simple pardonu. Ne vokas ili en sian palacon — kaj ne necesas. Por ni ankaŭ en Muskoj ne pluvas, ni ankaŭ mem pirogojn manĝas!

Iomete rememoradinte sian ofendiĝon, dum la vojo iris apud la vojevoda domo, Ivaĉjo, elirinte al Dvino, tuj revigliĝis: la ŝipa floto, etendiĝinte per granda arko, staris ĉe ankroj nemalproksime de la bordo. Velboatoj, barkoj, remboatoj ĉe ĉiuj flankoj aliĝis al la ŝipoj; matrosoj kun krioj entrenadis sur la ferdekojn sakojn, barelojn, korbojn, tiris sur ŝnuregoj grandajn kaj malgrandajn kanonojn, kuglegojn en retoj, pulvon en lignaj kofroj. Malgrandaj boatoj kun ŝipaj oficiroj rapide navedis per remiloj inter la ŝipoj; oficiroj en nigraj trikornaj ĉapeloj, en verdaj Preobraĵenskaj kaftanoj kun roversoj, en blankaj gantoj, kun spadoj, facile surkuradis laŭ ŝtuparoj. Sur iuj ŝipoj oni tiradis, ekzamenante antaŭ la militiro, ŝnuregojn,

sur aliaj facile frapadis lignaj marteloj de kalfatristoj, sur triaj kaporaloj kaj ferdekestroj faradis kun matrosoj ekzercojn. Dvino bolis per vivo, kaj al Ivaĉjo estis gaje pensi, ke baldaŭ ankaŭ li estos sur ŝipo kaj plenumos sian nerompeblan decidon.

Al la kajo ofte aliradis boatetoj kaj gigoj, sed de «Sanktaj Apostoloj», kvazaŭ spite, longe neniu venadis, kaj Ivaĉjo komencis jam pensi, ĉu li atingu la flagŝipon de alia ŝipo, kiam subite al traboj de la albordiĝejo frapis flanko de granda gigo, kaj la rudristo, ekstarinte sur la benkon, kriis:

— Kiu al «Apostoloj»? Tuj!

Ivaĉjo aliris pli proksime, diris:

— Mi al «Apostoloj».

— Kaj kiu do vi estas? — demandis la matroso, gaje rigardante al Ivaĉjo kaj montrante blankajn dentojn.

— De Rjabov, rudristo, mi estas filo.

— De Ivano Sabateiĉ?

— De li.

— Jen kia vi estas!

— Ja tia.

— Kaj kia estas via nomo?

— Mia nomo estas Ivano.

— Do, Ivano Ivanoviĉ?

Ivaĉjo iom konfuziĝis kaj ne respondis.

— Ĉu al la patro vi iras? — ree demandis la matroso.

— Al li!

— Sed ĉu li estas sur «Apostoloj»?

Alia matroso — remestro — diris, mordante sekalan biskoton:

— Kie do li estu, Ivano Sabateiĉ? En la eskadro. Eksidu, Ivano Ivanoviĉ, ni transportos.

Ivaĉjo malleviĝis en la gigon, demandis:

— Ĉu sur la sidilon?

— Sidilo, amiko, hejme restis, kaj ĉe ni ĝi nomiĝas flote — benko! — edife diris la remestro, apetite maĉante la biskoton.

Ivaĉjo iomete ruĝiĝis kaj, ĵetante rigardojn al la matroso kun la biskoto, eksidis kaj malligis sian pakon. Lin, laŭ ĉiuj signoj, kaptis ĝuste tiu manĝegemo, pri kiu antaŭ nelonge parolis avinjo Eŭdoĥa.

— Jen kia estas nia Ivano Ivanoviĉ! — diris tute juna matroso kun kuspita nazo kaj efelidhava vizaĝo. — Antaŭvidema oĉjo. Ĉion lin kunhavas!

— Ĉi tie por la tuta kompanio sufiĉos manĝeti! — afable proponis Ivaĉjo. — Gustumu...

Sed la matrosoj ne gustumis la Ivaĉjan provizon, dirinte, ke por ili estas propra nutro de la ŝtato kaj tiu ŝtata nutro estas tute sufiĉa.

Supre, de la kajo, konata voĉo demandis:

— Ĉu de «Apostoloj», knaboj?

Kaj Silvestro Petroviĉ, jam sen lambastono, nur kun promenbastono, saltis en la gigon.

— Jen kiu estas ĉi tie! — miris li, kaj eksidinte apud Ivaĉjo,

prenis per la malmolaj fingroj lian mentonon kun kaveto. — Nu, saluton, baptofilo. Viŝu, fraĉjo, la vizaĝon, ĝi tuta estas en kazeo...

Ivaĉjo obeeme viŝis sin.

La gigo debordiĝis de la Resurekta kajo kaj vigle ekiris al la flagŝipo de la eskadro, kiu staris ĉe du ankroj meze de brilanta sub sunaj radioj Dvino.

— Kial do vi ne venas gasti? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Ne ni transloĝiĝis! — respondis Ivaĉjo. — Kiuj transloĝiĝis — tiuj devus respekti per veno, laŭ la moro.

— Kaj de kie vi la moron scias?

— Avinjo diris...

— Jen, diris. Sed vi estas viro. Vi la fraŭlinojn devus respekti per veno la unua.

Ivaĉjo pensis, poste respondis nelaŭte:

— Ne necesas... Ni ne mortos...

— Ĉu same la avinjo diris?

— Ne. Paĉjo...

Li hele, per sia speciala, Rjabov-a maniero rigardis en la okulojn de Silvestro Petroviĉ kaj prononcis klare:

— Ni eĉ al Dio ĝistere ne riverencas, ni la kolon antaŭ neniu klini kutimas...

— Ĉu la paĉjo diris?

— Ne. Panjo instruis.

— Ĉu pro tio vi ne venas?

— Laŭ la moro! — firme diris Ivaĉjo. — Kiuj transloĝiĝis, tiuj respektu...

Silvestro Petroviĉ malgaje suspiris, demandis, kie estas nun la unua piloto. Ivaĉjo ne respondis. Demandis, por kio Ivaĉjo bezonas iri sur la ŝipon, — tiu ree ne respondis. Ievlev atente fiksrigardis la dense ruĝan, spirantan per sano vizaĝon de la knabo, faris ankoraŭ kelkajn ruzajn demandojn kaj momente divenis la Ivaĉjan sekretan kaj nerompeblan decidon.

Laŭ ŝtuparo ili leviĝis kune, mano ĉe mano eniris en grandan admiralan kajuton, ornamitan per koloraj ledoj kaj bronzo. Ĉi tie, super granda mapo, sidis la caro kaj Teodoro Matejeviĉ Apraksin. Ili ambaŭ estis sen kaftanoj: la caro — en blanka ĉemizo, Apraksin — en arĝente brodita kamizolo. Silvestro Petroviĉ sidigis Ivaĉjon malproksime, en fotelon, malfermis antaŭ li gliman fenestron, donis al li en la manojn lornon — rigardi kien li deziros, — kaj ordonis silenti. Ivaĉjo, senĉese kaj kun apetito maĉante el sia pako, komencis rigardi en la mirindan lornon, mallaŭte aĥante ĉe tio pro ravo, kaj Ievlev eksidis proksime al la caro, kliniĝis al li kaj diris, ridetante per siaj helbluaj okuloj:

— Jen, Siro, maristo de la estonta floto Rusia. Fuĝis el la gepatra hejmo, por foriri kun la floto en la maron. Ruza knabo, sed ankaŭ mi ne estas simplulo...

La caro ĵetis flankan rigardon al Ivaĉjo, demandis mallonge:

— Ĉu li?

— Li. Maĉas kaj en la lornon rigardas.

— Kies li estas?

— De Rjabov, rudristo, filo, kaj mia baptofilo.

Deŝirinte lacan rigardon de la mapo, Apraksin prononcis:

— Li ne estas sola, Silvestro Petroviĉ. Amasaj estas volontuloj. Soldatojn ni per bastonoj enpelas, sed la lokaj loĝantoj — dvinanoj kaj pomoroj — venas al ŝipoj, petas preni ilin kiel matrosojn. En Pomorio estas lulilo por matrosoj de la ŝipa floto. Kaj ili sukcese superas la novan por si kaj malfacilan laboron. Estas iuj, kiuj nur en la antaŭa semajno botojn ricevis, sed nun la ŝipon konas kiel siajn kvin fingrojn.

Petro penseme diris:

— Bone! Planas ni en nemalproksimaj tempoj preni de ĉi tie dvinanojn kaj blankmaranojn por nia ŝipa floto ne malpli ol mil homoj, por el ili kernon krei de veraj matrosoj...

— Ne nur matrosoj, sed ankaŭ oficiroj, Siro! — diris Apraksin. — Senprokraste necesas kelkajn junulojn en la navigistan lernejon sendi. Jen antaŭ nelonge Silvestro Petroviĉ menciis la mortigitan de la svedoj Metrion Goroĵanin-on, kaj tiaj, kiel li, ankaŭ inter vivantoj nun estas nemalmultaj...

— Skribu pri ili registron! — ordonis Petro. — Urĝe necesas fari, el Arĥangelsko ni jam hodiaŭ sendos. Tempo kostas multe, poste ni ne havos tempon.

Li verŝis por si kruĉeton da kvaso, eltrinkis unuglute, ordonis voki kajut-vaĉanton. Trans la pordo aŭdiĝis disputantaj voĉoj, timigita flustro, elŝoviĝis ies liphara kapo:

— Kiun, kiun?

— Kajut-vaĉanton! — kolerante, ordonis Petro.

Oni ree ekflustris, ekkuris. Apraksin, kaŝante rideton, kriis:

— Fileĉjo!

Tuj eniris junulo en senzona ĉemizo, kun pura rigardo de gajaj okuloj, blondhara, nudpieda.

— Memorfiksu, Fileĉjo, — severe diris Apraksin. — Kajut-vaĉanto estas vi, Fileĉjo. Ĉu vi komprenis?

— Antaŭ nelonge mi estis asistanto de timermano, asistanto de kanonestro, nun kajut-vaĉanto! — respondis Fileĉjo. — La vortoj ja estas ne niaj, ĉu estas facile...

Apraksin turniĝis al la caro:

— Maristoj ili estas — pli bonaj ne troveblas, sed pri fremdaj vortoj estas malfacile. Se oni nomus ilin en nia maniero — servosoldato, ĉarpentisto!

— Ne stultumu! — ordonis Petro. Kaj ordonis al la kajut-vaĉanto Fileĉjo: — Iru por la carido, ke li ĉi tien al mi venu.

Fileĉjo, turniĝinte sur la nudaj kalkanoj, forkuris. Petro vokis al si Ivaĉjon. Tiu kun suspiro deŝiriĝis de la lorno, sendezire degrimpis de la fotelo. La caron li ne konis laŭvide, ĉar en tiu tago, kiam ĉe la rudristo estis primetita la festeno, li haladziĝis pro tabako, kiun fumis la gastoj, kaj ĉio konfuziĝis en lia kapo — uniformoj, lipharoj, spadoj, kaftanoj, kamizoloj, pirogoj, kalikoj. Enmemoriĝis nur, kiel Taisja matene diris al la rudristo:

— Nu, Ivano Sabateiĉ, portu monon almenaŭ kvin kopekojn. Forregaliĝis ni.

La patro tiam skrapis la nukon, iris trovi kvin kopekojn.

— Ĉu vi konas min? — demandis Petro, kiam Ivaĉjo, tenante en la mano la lornon, haltis antaŭ li.

— Ne konas.

— Mi ĉe via patro gastis.

— Multaj gastis! — diris Ivaĉjo, turnante en la manoj la kupran tubon de la lorno. — Kaj koloneloj gastis, kaj generaloj, kaj ŝipestroj, kaj la caro mem gastis...

— Pri la caro vi, eble, mensogas?

— Ne, ne mensogas.

— Nu, kaj se ne mensogas, tiam pri afero ni parolu. Kiam vi elkreskos granda — kiu vi iĝos?

— Ĉu mi?

— Vi.

— Ja maristo mi iĝos.

— Ĉu sur ŝipo aŭ vi fiŝkaptos?

Ivaĉjo metis sub la vangon la lastan pecon de flano, pensis, respondis per fabelo, kiun rakontis avinjo Eŭdoĥa:

— Kiam mi elkreskos kiel necesas, mi iros al la caro en la blankŝtonan palacon, riverencos en la granda maniero, petos lin, nian patron: «Via cara moŝto, suno hela, ne ordonu ekzekuti, ordonu absolvi, ordonu vorton diri: avo mia Sabateo kiel rudristo en la maron iradis, patro mia Ivano estas en via cara servo, ordonu ankaŭ al mi sur granda ŝipo en oceanon-maron iri...»

Petro larĝe ridetis, tiris Ivaĉjon al si, kunpremis lin per la genuoj, demandis per plivarmiĝinta voĉo:

— Kiu instruis vin, fiŝista filo, kiel kun caro paroli?

— Ja avinjo Eŭdoĥa! — finmaĉante la flanon, respondis

Ivaĉjo kaj daŭrigis: — Kaj kisos min la cara moŝto, suno hela, en la buŝon dolĉan, kaj donos en miajn manojn sabron akran, bulatan, kaj pridonacos min per trezoro nekalkulebla...

La caro ekridegis laŭte, firme kunpremante la ŝultrojn de Ivaĉjo, diris:

— Estos vi maristo, knabo, kresku nur iomete...

La pordo knaris. Sur la vizaĝo de Petro glitis ombro, li depuŝis de si Ivaĉjon kaj ordonis:

— Iru jen — kun la carido ludu. Iru sur la pobkastelon aŭ sur la pobferdekon, kanonoj tie estas, ĉio multas — vi promenos... Iru ambaŭ, ludu.

— Ĉu la lornon mi kunprenu aŭ ĉi tie lasu? — demandis Ivaĉjo, kaj estis videble, ke li ne povas foriri sen la lorno.

— Prenu, prenu, kun vi prenu! — kun preteco diris Petro. — Kaj la lornon prenu, kaj kio tie ankoraŭ estas. Silvestro Petroviĉ, donu al ili po muskedo, sabrojn donu...

Al Ivaĉjo pro ravo tute ruĝiĝis la vizaĝo, li turnis sin al la pala knabo, kiu, pendiginte la longajn brakojn, staris apude, puŝis lin per la kubuto, por ke tiu komprenu, kiel bone al ili nun estos, sed la knabo eĉ ne moviĝis.

Ivaĉjo kaj Aleksio eliris kun Ievlev. Petro longe sidis silente, poste, rigardante en la fenestron, flustre prononcis:

— Ho Dio ĉiopova, ŝtelis vi mian filon!

— Kio? — demandis Apraksin, deŝiriĝante de la mapo.

— Vi kalkulu, mezuru! — respondis Petro, pensante pri la sia. — Kalkulu, Teodoro Matejeviĉ, nun ni erari neniel rajtas...

2. Carido Aleksio

Restinte duope kun Aleksio, pririgardante la pistolon, Ivaĉjo demandis:

— Aŭskultu, Aleĉjo, kaj kial oni vin moknomas carido?

— Ĉar mi ja estas carido...

Ivaĉjo subridis:

— Mensogu pli bone. Se vi estas carido, tiam mi estas caro.

Li streĉis la ĉanon de la pistolo, ekcelis al la masto, diris base:

— Jen mi pafos!

La ŝipo apenaŭ rimarkeble estis balanciĝanta, Dvino brilis tiel, ke al ĝi estis dolore rigardi. Ĉirkaŭe sur la flagŝipo oni laboris, matrosoj levadis sur pulioj kverkajn kanonajn afustojn, rezervajn jardojn, kunmetitajn kaj ligitajn velojn. Larĝe kaj libere fluis super la rivero kanto, insiste, gaje, intermite frapadis marteloj de kalfatristoj, kun grinco batadis martelegoj de ŝipaj forĝistoj. Al «Sanktaj Apostoloj» de tempo al tempo aliĝadis barkoj, gigoj, velboatoj; ŝajnis, ke por akcepti transportaĵojn jam ne estos loko, sed la senfundaj holdoj plu estis duone malplenaj. Pro hela suna lumo, pro arĝenta brilo de Dvino, pro ĉiuj ĉi vigligaj bruoj de granda kaj akorda laboro Ivaĉjo deziris kuri, grimpi sur ŝtuparoj, salti kaj ĝoji, kiel ĝojas bovido sur sukoplena printempa herbo, sed la knabo, kun kiu al li estis ordonite ludi, sidis senmove, enue mallarĝigis la okulojn kaj silentis.

— Ĉu vi ne iros la ŝipon rigardi? — demandis Ivaĉjo.

— Sed kion sur ĝi rigardi?

— Jen, kion vi diras! Kion rigardi! Kanonojn, kiel oni sur ŝnuregoj ion trenas, kuirejon...

Li ruze ridetis:

— Eble, tie oni pirogojn bakas, nin regalos...

Aleksio malmilde ordonis:

— Sidu ĉi tie.

— Tiam ni rigardu en la lornon!

— Ne bezonas mi vian lornon...

— Ne bezonas? Ĉu la lornon ne bezonas? — miregis Ivaĉjo. — Ja vi nur unu fojon en ĝin rigardu — vi ne deŝiriĝos. Rigardu, kio per ĝi estas videbla...

— Ne alkroĉiĝu! — ordonis Aleksio.

— Nu kaj... ankaŭ mi vin ne bezonas!

Kaj Ivaĉjo mem komencis rigardi en la lornon, hastante satrigardi, ĝis neniu deprenis la mirindan maŝinon. Sed unuope tamen rigardi estis ne tiom interese, kaj Ivaĉjo komencis turniĝi, serĉante pretekston foriri kun la valorega lorno ien malproksimen — al aliaj infanoj.

— Kial vi turniĝas? — demandis Aleksio. — Sidu, kiel mi sidas.

Al Ivaĉjo fariĝis enua vizaĝo. Ambaŭ sidis sur volvaĵo de ŝnurego apude, rigardis malproksimen. Super Dvino, super malgrandaj boatetoj kaj grandaj ŝipoj kun krioj ĵetiĝadis mevoj. Pretere, laŭ la pobkastelo pasadis iuj korpulentaj, dikventraj bojaroj, malalte, respekte, eĉ kun timo riverencadis al Aleksio. Tiu, rigardante preter ili, ne respondadis, kaj al unu faris aĉan

grimacon kaj montris la langon. Alia bojaro — grasa, pufa, kun pendantaj malsekaj lipharoj — aliris kun riverenco pli proksime, kisis al la carido la manon, demandis pri la sano, diris, ke en Moskvo nun estas bone, malsame de ĉi malbenita de Dio Arĥangelsko. La carido ne respondis, la bojaro foriris kun riverencoj kankre.

— Ĉu vi estas popo?

— Popo? — miris Aleksio.

— Kaj se ne popo — por kio do li al via mano almetiĝas?

Aleksio subridis kun malestimo, nenion respondis.

— Arĥangelsko al li estas malbona! — ofendite diris Ivaĉjo. — Malbenita de Dio! Jen kia rivero ĉe ni estas, Komerca korto, ŝipoj. Insultis li la urbon, sed pro kio?

Li pensis iom kaj aldonis:

— Iros mi for de vi. Prenu vian lornon kaj muskedon. Mi iros... Kial tiele sidi.

— Nu kien vi iros! — kun kolera angoro, turniĝinte al Ivaĉjo per tuta sia longa blanka vizaĝo, demandis Aleksio. — Kion vi bezonas? Ni sidas, kaj bone. Ni ankoraŭ vidos sufiĉe. Estos balanciĝo, maro kun ondoj, knaro, bruo...

Li skuiĝis, krakis per la fingroj, ĝibetiĝis, kiel maljunulo, ree ekparolis:

— Krio, bruo, ĉiuj kuras, estas nenia kvieto. Por kio ĝi necesas, maro? Nu, akvo kaj akvo, kiu bezonas — veturu sur maro, sed mi por kio?

Ivaĉjo per rondaj okuloj rigardis al Aleksio, ne komprenante, pri kio tiu parolas.

— Dormu, li ordonas, sur la ŝipo, kutimiĝu! Sed kiel dormi ĉi tie, se ĝi skuiĝas, ĉi ŝipo damnita? Skuiĝas kaj balanciĝas...

La carido plu parolis kaj parolis, kraketante per la fingroj, sed Ivaĉjo ĉesis aŭskulti, komencis observi tion, kiel matrosoj sur pulioj levas sur la ŝipon savboaton. Pro la mallaŭta voĉo de la carido, pro tio, kiel li kraketadis per la fingroj de la blankaj manoj, kiel maljunuline kunpremadis la lipojn, al Ivaĉjo iĝis neelteneble enue. Li leviĝis, por foriri, sed Aleksio subite per la ungoj dolore pinĉis lian kruron kaj ordonis kun ŝriko en la voĉo:

— Estas dirite — sidu!

— Sed pro kio vi pinĉas? — koleriĝis Ivaĉjo. — Vi, knabo, kion pri mi pensas? Mi vin tiel pinĉos, ke vi trans la randon falos, nur vezikoj supren iros...

— Se vi pinĉos — tiam al vi oni la kapon forhakos! — respondis Aleksio.

— Kapon?

— Plene forhakos! Kaj sur palison surmetos! Pinĉu, provu!

— Mi ne timos!

— Sed vi ja ektimis!

Ivaĉjo ekrigardis kiel kolera bovo, klinis la buklan haron flanken, firme kunpremis la pugnojn. Aleksio staris antaŭ li — alta, kun haroj ĝis la ŝultroj, blankvizaĝa, kolera, — kaj kiu scias, kio okazus poste, se ne aperus tiutempe sur la pobkastelo rudristo Rjabov. Per trankvilaj paŝoj li aliris al la knaboj, metis la manon sur la ŝultron de la filo, turnis Ivaĉjon al si.

— Iru, infano, hejmen! — ordonis li per glata kaj bonkora

voĉo. — Iru, kara. Panjo tie pri vi malĝojas, avinjo Eŭdoĥa ploras... Ni iru, sur la gigon mi vin kondukos, iru, fileto...

Aleksio abrupte tiris Rjabov-on je la maniko, kriis:

— Al li estis ordonite esti kun mi, ĉe mia persono!

— Sed li ja, sinjoro, vin batos...

— Kaj se batos — oni lin ekzekutos!

— Por kio do mi tion bezonas? — subridinte, respondis Rjabov kaj ree turnis sin al Ivaĉjo: — Ne, fileto, estu hodiaŭ laŭ mi. Ni iru!

Aleksio frapis per la piedo, Rjabov kvazaŭ ne rimarkis tion. Senhaste li kondukis la filon al la ŝtuparo kaj, kun kareso rigardante en liajn okulojn, plenajn de koleraj larmoj, mallaŭte ekparolis:

— Lasu, infano, lasu, kara. Vi estas ol li pli bona, pli kuraĝa, pli forta, sed tamen ne vane oni diras, ke eĉ kulo ĉevalon faligos, se lupo helpos. Li estas kulo, sed post li kiom da lupoj! Iru, infaneto, hejmen, kaj ne malĝoju, vi elkreskos iomete — mi iros kun vi en la maron sur granda ŝipo, velojn levos...

— Sed la decido ja mia, paĉjo, estas nerompebla, — plorante per pize grandaj larmoj, diris Ivaĉjo.

— Kia decido?

— Nerompebla — sur ŝipo kun vi iri!

— Vi iros, karulo, iros! — trankviligis Rjabov. — Se ne hodiaŭ, tiam baldaŭ. Kaj estos vi bona maristo, ne troveblas tiaj maristoj. Kaj nerompebla estas via decido, nerompebla...

Li malleviĝis kune kun la filo laŭ la ŝtuparo, sidigis lin en la gigon, donis al li tutan kopekon por regaloj kaj longe svingadis la manon, starante ĉe la ŝipa rando.

3. Al pilgrimado!

Vespere la urbo Arĥangelsko estis elakompananta la caran floton. Al la Dvina bordo en kaleŝo, donacita de Petro, venis Atanazio, sed eliri sur la albordiĝejon pro malforteco li jam ne povis. Al ekirantaj ŝipoj salutadis kanonoj, laŭte kaj solene sonoris sonoriloj. El fremdlandaj komercaj ŝipoj oni atente rigardis al la cara jaĥto per lornoj, Arĥangelskaj fremduloj-negocistoj kun konsulo Martus ĉekape estis interparolantaj:

— Jen lia sanktoleita moŝto — en funebra vesto por preĝado.

— Al Zosimo kaj Sabatio li ekiras.

— Tio estas por longe. Rusaj caroj ŝatas preĝi.

— Sed por kio per tuta floto?

— Ili diras, ke tiel deziras ilia dio.

Atanazio lastfoje svingis la manon al la ŝipoj — ili foriradis unu post alia, favora vento estis ŝveliganta la arĝente blankajn velojn. Sed ĉe la Novdvina citadelo la floto ree ĵetis ankrojn. Sub la vualo de malhela aŭgusta nokto oni kaŝe, sen fajroj kaj paroloj, komencis akcepti sur la ŝipojn preobraĵenskanojn, matrosojn, pafistojn, kanonistojn. La homoj leviĝadis laŭ ŝtuparoj per silenta vico, la ŝipanoj kondukadis ilin al la destinitaj lokoj, kie jam estis preparitaj kaldronoj kun buterita kaĉo, bareloj da kvaso, biskotoj sur bastomatoj.

Sur «Sanktaj Apostoloj» ĉe la ŝtuparo staris Petro

Aleksejeviĉ mem kun Ievlev, Apraksin kaj Menŝikov. Preobraĵenskanoj eĉ en malhelo rekonadis la caron, li nelaŭte ŝercadis kun ili. Menŝikov, ne sukcesinta vespermanĝi pro klopodoj, estis ronĝanta per la fortikaj dentoj sekan kringon. Ievlev kaj Apraksin, starante malproksime, estis nelaŭte interparolantaj. Blovis varma favora vento. Grandaj, helaj steloj rigardis de la ĉielo al la eskadro, al velboatoj, de kiuj venadis la homoj, al la remparoj kaj turoj de la fortreso. Odoris je peĉo, fojfoje vento alportadis de la bordoj odorojn de sekaj herboj. Estis aŭdeble, kiel Petro de tempo al tempo demandadis:

— Kies homoj?

El malhelo oni respondadis:

— De regimento de princo Meŝĉerskij, Siro.

— De regimento de princo Volkonskij!

— De Kropotov, Siro!

Menŝikov intencis ekfumi pipon, Petro batis lin al la mano:

— Ĉu vi, kara infano, tute stultiĝis, mi pensas?

— Mi rigardas — kaj ne kredas! — mallaŭte diris Apraksin al Ievlev. — Vere ni ĝisvivis. Floto. Kaj nemalgranda ŝipa floto.

Petro el malproksime demandis:

— Sinjoro admiralo, ĉu ne sufiĉas? Kvarcent animojn ni prenis...

— Probable, sufiĉas! — respondis Apraksin.

— Kial sufiĉas? — el ie el mallumo demandis Rjabov. —

Ankoraŭ du centojn eblas preni. Ne barko, mi pensas, kaj ne velboato — ŝipo!

Ferdekestro Semisadov estis kalkulanta:

— Kvarcent ses, kvarcent sep, kvarcent ok, — ek, knaboj, paŝu pli vigle...

Ĉe mateniĝo la eskadro trairis la skansojn kaj eliris en la altan maron.

En la admirala kajuto la pafista estro Simono Borisoviĉ, ree nomumita al sia antaŭa posteno, rakontadis al la caro detalojn de la batalo ĉe la muroj de la Novdvina fortreso. Silvestro Petroviĉ sidis forturniĝinte, lia vizaĝo brulis pro emocio. Jegorĉjo Pustovojtov, starante nemalproksime, aldonadis tion, kion ne sciis la pafista estro. Iam diradis siajn rimarkojn ankaŭ Ĥagajo. Petro aŭskultis avide, balancadis la piedon en brilanta altboto, suĉadis antaŭlonge estingiĝintan holandan pipon. Poste li forturniĝis al la fenestro — tie, post la pobo de la kuranta sub ĉiuj veloj flagŝipo, per difinita, bela ordo, tuta en etaj, brilantaj sub la suno ŝprucoj, estis iranta la eskadro — ŝipoj, fregatoj, jaĥtoj.

— Ni iras per floto! — diris Petro Aleksejeviĉ. — Per mara floto. Iom selformaj ankoraŭ estas niaj ŝipoj, multo en ili estas tute ne perfekta, sed tamen — eskadro. Ne la Azova militiro, alia ĉio estas nun, alia...

Poste Silvestro Petroviĉ leviĝis sur la pobkastelon, al Rjabov, kiu en blanka krudtola ĉemizo, kun malfermita kolumo, en kaftano, surĵetita sur la ŝultrojn, staris apud la ŝipa kompaso. Ekvidinte Ievlev-on, li larĝe ridetis, diris:

— Ĉu vi aŭdis, kiel je la subadmiralo oni drinkas? Sur la

bordo ankaŭ ni gratulos, Silvestro Petroviĉ. Subadmiralo de la floto Rusia. Granda afero. Festenon necesas por ĉi okazo primeti por kvin tagoj, aŭ eĉ por tuta semajno... Ĝojas mi pri vi, sinjoro Ievlev...

— Vi ĝojas, sed kion vi al la filo instruas, — respondis Silvestro Petroviĉ. — Li miajn fraŭlinojn per veno ne respektis dum kioma tempo...

Rjabov respondis severe:

— Prave mi instruas, sinjoro subadmiralo! Kiel mi mem vivis, tiel ankaŭ li vivos. Kaj vi mem scias, kies pravo estas — ĉu mia aŭ de Maria Nikitiŝna...

Aliris, frapetante per nova betula kruro, Semisadov, gratulis pri la cara favoraĵo — la tuta ŝipanaro aŭdis, kiel Petro drinkis je la sano de subadmiralo Ievlev, gratulis ankaŭ knaboj en brave surmetitaj trikitaj ĉapoj. Krudaj pro vento vizaĝoj kun deskvamiĝanta sur la nazoj haŭto gaje ridetis, fortikaj kalaj peĉitaj manoj premadis la manon de Ievlev. Iu base diris:

— Vi estu pli severa, Silvestro Petroviĉ, ni estas homoj gajaj. Kaj se la grego estas furioza, la paŝtisto ne estu anĝelo, tion ĉiuj scias...

La matrosoj ekridis, Ievlev forsvingis, ekiris tra la ŝipo rigardi la ordon. Gaja sala mara vento estis fajfanta en ŝnuroj, la ŝipo balanciĝadis, egalmezure knaradis la korpo de la ŝipo, akre odoris je peĉo, kanabaj ŝnuroj, algoj. Sur la pruferdeko matrosoj estis kantantaj kanton. Ievlev haltis, fiksaŭskultis:

En la urbo do en la Arĥanĝela,
Sur patrino, sur rivero Dvino,
Sur kvieta Solombal-insulo

Ŝipojn rigis do matroso juna.

«Jen nun eĉ kantoj pri ni estas verkitaj», — pensis Silvestro Petroviĉ.

En la urbo do en la Arĥanĝela
Restos mi sen la matroso kara,
Amo, amo mia, kara amo,
Junmatroso, ĉap' trikita.
Ĉap' trikita, spado nigra,
Okuloj bluaj, blanka velo,
Kanonoj kupraj, ŝnur' kanaba,
Junmatroso, ne forgesu min...

Silvestro Petroviĉ plenŝtopis la pipon per nigra tabako, aliris al pelvo, en kiu estis bruletanta ŝipa meĉo, ekfumis. La matrosoj plu kantis per viglaj voĉoj:

Do en urbo en la Arĥanĝela,
Sur patrino, sur rivero Dvino,
Sur kvieta Solombal-insulo
Via amo kara larmojn verŝas...

Iu malantaŭe tuŝis lian kubuton — li returniĝis. Rjabov kun stranga gaj-kolera esprimo de la vizaĝo diris al Silvestro Petroviĉ al la orelo:

— Mia bubo ja kion faris...

— Kio?

— La filo Di-donita, Ivano...

— Ĉu li estas ĉi tie? — divenis Silvestro Petroviĉ.

— Ĉi tie, diablido. Kaj kiel li surgrimpis — neniu vidis. Kion fari nun?

Al Silvestro Petroviĉ tremis la lipoj — li ne povis reteni rideton. Ridetis ankaŭ Rjabov, sed la okuloj rigardis maltrankvile.

— Indus vergi lin senkompate, sed mi ne povas! — diris li. — Mi en la pasinta tempo same al barko kaŝe foriris al la patro, kaj sufiĉis al mi stulteco — pri tio mi al Ivaĉjo rakontis. Nun mi eĉ ne rajtas riproĉi...

— Kiam al Solovkio ni venos — vi donos la knabon al monaĥoj, ili hejmen lin portos! — konsilis Silvestro Petroviĉ.

Rjabov kolere grakis:

— Li ankoraŭ foje foriros! Nerompebla estas lia decido, nun li ĉiel ajn laŭ si faros...

— Kaj kion li faras nun?

— Ja kion — nenion! Sidas en la holdo, biskoton ronĝas.

— Marmalsanon ne havas?

— Ŝajne ne...

Silvestro Petroviĉ ree deziris ridi.

— Ne malĝoju, Ivano Sabateiĉ! — diris li. — Al Taisja Antipovna ni skribos de Solovkio, estos la knabo kun vi. Vi estos ĉe la stirrado, li estos ĉe vi, li kutimiĝu al la mara laboro. Kaj post tempopaso ni sendos lin al Moskvo, en la navigistan lernejon.

Rjabov ekrigardis en la okulojn de Ievlev, mallaŭte diris:

— Se la afero irus tiel, sed povas ja alie turniĝi. Soldatojn ni kaŝe prenis, por kio? Ne por pilgrimado ja, ĉu, Silvestro Petroviĉ? Fortan kaĉon ni kuiras, mi sentas... Nu, do bone, kial

paroli...

En krepusko Ivaĉjo staris apud la patro ĉe la stirrado. Lia vizaĝo ruĝiĝis pro vento, la okuloj larmis, sed li staris firme, en la patra maniero kaj same, kiel la rudristo, mallarĝigis la verdajn okulojn...

— Kaj la caridon vi ne timu! — mallaŭte diris Rjabov al la filo. — Li, probable, supren eĉ ne eliros, al la maro eĉ rigardon ne ĵetos. Marmalsanas Aleĉjo. Kaj kiam la maro kvietiĝos — iru al soldatoj en la holdon, ili ne ofendos.

— Ĉu vespermanĝon oni donos? — interesiĝis Ivaĉjo.

— Eble, donos!

— Bone, se donos. Mia ventro kuntiriĝis.

Vespermanĝis la patro kun la filo el unu bovlo — manĝis brasiksupon, almanĝis biskoton. Apude staris ferdekestro Semisadov, miris:

— Forta manĝanto estas via knabo. Se al antaŭsignoj kredi — li longe vivos sur maro. Mi en lia aĝo same emis panon manĝi, sed lin mi ne atingos, vian filon...

Ĉapitro oka

> Kun amikoj ne estas ĝene, dum solulo eĉ ĉe kaĉo pereos.
>
> *Proverbo*

1. En la Solovkia klostro

La 10-an de aŭgusto la floto ĵetis ankrojn ĉe la Zajca insulo[138], Petro kun filo Aleksio, kun grafo Golovin, kun Menŝikov kaj regimentestroj veturis por preĝi en la klostron, super kiu senĉese zumadis sonorilado honore al la cara veno, kaj al Ievlev kaj Apraksin estis ordonite eliri en la maron kaj, dividinte la ŝipojn je du eskadroj, komenci longan ludan batalon. La ŝipojn oni dividadis per lotado, dirante kaj kaptante per la mano bastonon:

— Unu preno, dua preno, supra posteno, en ĉielo arko, en barko marko, sur muro korniko — nigra maniko, sonorilo — laŭta trilo: ŝipon al mi, ŝipon al vi, al kiu la ŝipo? Mia supro!

Bojaroj el la sekvantaro, klukante pro timo, ankoraŭ estis sidiĝantaj en gigojn — por iri al la bordo, kaj sur la ŝipoj de ambaŭ eskadroj jam estis komenciĝanta tiu strecita agado, kiu ĉiam antaŭas grandajn manovrojn kaj batalon. La ŝipoj de Silvestro Petroviĉ hisis bluajn pobflagojn, la eskadro de Apraksin — blankajn. Ievlev en subadmirala uniformo, kun spado, en trikorna ĉapelo estis malrapide pasumanta sur la pobkastelo, Apraksin estis pririgardanta el sia flagŝipo mornajn bordojn de insuloj, tumulton sur la ŝipoj de la blua floto,

---

138 Unu el la insuloj de la Solovkia arĥipelago *(trad.)*

mistere ridetadis kaj suspiradis: kontraŭ Ievlev eĉ lude batali estis malfacile.

Post la tutnokta diservo la batalo komenciĝis.

Kanona tondra pafado dum la tuta nokto perturbadis la klostron, malhelpis dormi, malkvietigadis monaĥojn. Fratoj el eksaj militistoj — frato armilisto, frato pulvisto, frato kanonisto longe post la noktomezo staris sur la monaĥeja muro, interinsultadis, vetis, kiu venkos — ĉu la bluaj aŭ la blankaj. Monaĥejaj lancistoj insultadis unu la alian per maldecaj voĉoj, la prioro dispelis ilin al la keloj per la bastono, dirante:

— Jen, damnitaj batalistoj, komencis militon!

Matene de la turo de la monaĥejo Petro per lorno pririgardadis manovrojn de la ŝipoj kaj ĝojadis pro ruzaĵoj de ambaŭ admiraloj. La maro hele brilis sub la suno, la ŝipoj moviĝis majeste, kvazaŭ cignoj, bele arĝentis rondaj fumoj de kanonaj pafoj, vento flirtigis grandegajn tukojn de trikoloraj flagoj, — la blua kaj la blanka flotoj sur la mastoj tamen portis la rusajn flagojn.

— Do, nun eĉ ne estas hontinde en la Balta maro aperi! — nehaste prononcis Teodoro Aleksejeviĉ. — Inde ni konstruis...

— Stultaĵojn vi babilas, — interrompis Petro. — Malmulte ankoraŭ, ho, malmulte...

— Oni, *Min Her*, konstruas tro senhaste, sen penigi sin, — plendis Menŝikov. — Vere mi diras, ili ne urĝiĝas, kaj rapida rezulto ne videblas...

Petro turniĝis al Aleksandro Daniloviĉ, diris kun furiozo:

— Anstataŭe vi tre bone faras! Por kio, hunda ido, vi ankaŭ

nun la monaĥejon priŝtelis? Ĉu al vi monaĥoj dormi malhelpas? Ĉiam al vi, diablo, estas malmulte! Kiom da fortoj mi aplikas, por ĉi monaĥojn laborigi, sed vi al ili senmonecon promesas kaj pro tio koruptaĵojn de ili prenas! Diablo avida, mi vian oron en vian nesatigeblan ventron enŝovos!

Svinginte, li batis Menŝikov-on per la lorno al la kapo kun tia forto, ke el la framo elsaltis unu vitro kaj, saltetante, ekruliĝis sur la ŝtonoj de la turo. Aleksandro Daniloviĉ kliniĝis, levis la vitron, grumblis:

— Prenu, *Min Her* Piter. Se vi perdos — ree mi estos batita!

Kaj plendis al Golovin:

— En ĉiu afero estas mia kulpo, kaj kion mi bonan faras — tion neniu vidas...

— Jen kompatindulo! — kolere subridis Petro kaj ree komencis rigardi al la foraj ŝipoj.

La tutan tagon li pasigis sur la turo, nur por la tutnokta diservo iris en la katedralon kaj, dispuŝinte monaĥojn en la maldekstra ĥorejo, ekkantis kun ili per malalta, densa baso. Ĉi tie estis malvarme kaj humide, Petro Aleksejeviĉ kuntiriĝadis, poste subite detiris de la kapo de grafo Golovin la perukon, surmetis sur siajn buklojn kaj ree komencis kanti malaltan noton, ridinde malfermante la buŝon. Kaj kalva Golovin strabis al la caro kaj glatumadis per la manoj la frostiĝantan kalvon. En la monaĥeja refektorio kune kun monaĥoj Petro kun la sekvantaro vespermanĝis per fiŝa brasiksupo kaj ree ekiris sur la turon, angorante en atendado de sciigoj. Nokte li dormis maltrankvile, ofte ekstaradis, eksidadis sur la fenestrobreton, avide enspiradis maran aeron, demandadis:

— Daniloviĉ, ĉu vi dormas?

Tiu, levante la kapon de la leda vojaĝa kuseno, arogante respondis:

— Vi almenaŭ lasu min la okulojn fermi, *Min Her*, je Dio jam mia cerbo iras promeni pro ĉi vivo. Tage vi min batas, nokte dormi ne permesas...

— Nu, dormu, dormu! — kulpe diris base Petro.

Kaj li iris en la najbaran kelon — paroli kun Golovin. Tiu ne dormis — sidis en silka ĉemizo kun la piedoj sur la benko, gratis la nudan grasan bruston, miris:

— Ĉu vi ne dormas, Siro? Sed indus! Vi, kara moŝto, estas juna, por vi dormo estas la plej grava afero. Antaŭ nelonge mi rigardis al vi — la okuloj estas ruĝaj, vi mem estas tute angora. Gardi sin necesas...

Petro suspiris infanece:

— Mankas dormo, Aleksejeviĉ! Mankas!

— Do vi blatojn kalkulu, — konsilis, komforte oscedante, Golovin. — Unu blato kaj du blatoj — tri blatoj. Tri blatoj — kaj al ili unu blato — kvar. Kvar kaj ankoraŭ blato — jen al vi kvin. Kun tio vi ekdormos. Mi en via aĝo neniam dekduon atingadis...

La caro subite koleriĝis:

— Dormi ĉiuj ŝatas. Elpensis diabloj pigraj: veturas en ĉareto en fora vojaĝo — ne dormas. Kaj kiam li al la loko venis — falis dormi. Tiel la tutan Rusion iu plenpova sinjoro tradormos. Nun mi ordonas: dormi en la vojo, kaj kiam vi ĝisveturis — plenumu la aferojn...

— Sur niaj vojoj ne multe eblas dormi...

— Sed vi ne timu! — malmilde diris Petro. — Per rimenoj fiksu vin en la kaleŝo, por ne elfali, kaj viajn blatojn kalkulu. Aferoj, Aleksejeviĉ, tro multas ĉe ni, sed ni dormas, kvazaŭ ĉiujn jam faris...

Li parolis kolere kaj vidis, ke Golovin en krepusko ridetas, tamen ne kun moko, sed kun malgajo kaj kun ia stranga, nekaraktera por li kortuŝiteco.

— Kio do estas ridinda? — abrupte demandis Petro.

— Ridinda? — miris Teodoro Aleksejeviĉ. — Tute ne, Siro. Jen mi aŭskultas vin kaj pensas — malfacile estas al vi, ĉu? Malfacile estas tiele noktojn travivi. Noktoj, ja ili estas longaj, ho, longaj...

Tiel pasis ankoraŭ kvar tagoj. En la kvina en la kelon, kiun estis okupanta Petro, eniris alta, rezolutaspekta, ŝvelinta pro kulaj pikoj oficiro kaj, riverencinte, elprenis el la manikroverso paperon. Per la mano de Ŝĉepotev estis skribitaj nur du vortoj: «Iri eblas».

Petro, feliĉe rigardante al la oficiro, ordonis doni al li kruĉeton da duoble forta vodko. La oficiro staris rekte, etendinte la larĝajn ŝultrojn, lia rigardo lumis per furioza adoro.

— Ĉi vodkon vi drinku je sukceso de iu konata de ni afero, — per firma juna voĉo prononcis Petro, — kaj trinku ĝis la fundo...

La oficiro, ne deŝirante la rigardon de Petro, forte alpremante la fingrojn, krucosignis sin kaj unuglute eltrinkis la tutan kruĉeton. Menŝikov donis al li kringon. Li la kringon garde kaŝis ĉe la sino, riverencis iel strange, flanke, kaj

komencis fali. Aleksandro Daniloviĉ kun deĵoranta servosoldato kaptis lin.

— Kun tuta gardo kaj respekto kuŝigi! — ordonis Petro. — Li pri nenio kulpas, dum longa tempo ne dormis, brave plenumis sian devon...

Kaj li ordonis pafi per la monaĥeja tura kanono trifoje, por ke la floto ĵetu ankrojn.

Menŝikov ekiris sur la turon.

Petro kuratingis lin, tiris je la maniko, diris kun ravo en la voĉo:

— Jam hodiaŭ ni ekiros, ĉu vi aŭdas, Daniloviĉ!

— Ja mi vidas! — respondis Menŝikov per plu ofendita voĉo.

Miloj da mevoj ĵetiĝadis super la monaĥejaj muroj, kriadis, faladis vertikale en la akvon. Puŝante unu la alian per la ŝultroj, Petro kaj Menŝikov metis ŝargon en la tubon, ne unu, sed unu kaj duonan mezuron da pulvo, longe ŝovadis ŝtopilon per rusta truilo. Magra monaĥo kun longa barbo tenis en la mano bruletantan meĉon. Petro alŝutis pulvon en la fuzeon, la monaĥo-kanonisto demandis:

— Ĉu vi benas pafi, Siro?

— Mi benas! — subridis Petro.

La kanono pafis tri fojojn, la flagŝipo respondis per la konvencia signalo — du pafojn kaj poste ankoraŭ du. La blua floto ekiris al la insulo — preni la caron.

Adiaŭante, Petro diris al la arĥimandrito:

— Monaĥojn, patro, eĉ ne unu sur la bordon forliberigu! Tro longajn langojn ili havas, babilos ion, kio ne necesas. Kaj en la katedralo faru diservojn kvazaŭ ĉe mi, kaj se iu ekdubos — kun tiu estu pli severa. Ĉi tie, diru, estas la caro — via monaĥejo, vidu, estas vasta — preĝas li kun asketoj, aŭ sur alian insuleton forveturis. Speciale gardu vin, patro, kontraŭ vantaj babilantoj, tia sola povas multajn pereigi...

Al la monaĥoj la manon por kiso li ne donis, kriis kolere:

— Tro frue vi adiaŭas! Mi iras en la maron ĝis la mateno, mi longe ĉe vi estos...

Post la tutnokta diservo li estis jam sur «Sanktaj Apostoloj», pridemandadis pri detaloj de la luda batalo, ridegis, retroklinante la kapon, mokadis ekscitiĝintajn Apraksin-on kaj Silvestron Petroviĉ-on. Ambaŭ admiraloj tiel sunbruniĝis dum ĉi tiuj tagoj en la maro, ke Menŝikov nomis ilin maŭroj. Pamburg, sidante apud Petro, diris al li en la germana flustre:

— Mi ne trovas vortojn, por esprimi mian plezuron pro servo sub komando de tiom bravaj admiraloj. Ili ankoraŭ ne estas tro spertaj kaj nemalmulte devos lerni en la mara arto, sed Dio dotis ilin per akra menso, kuraĝo, ruzo kaj volforto.

Varlan kapjesadis per la hirta peruko, trinkis bieron, laŭdadis matrosojn.

Petro kun malgaja rideto diris subite:

— Kaj mi sidas kaj rememoras junecon nian — Perejaslavlon, kaj kiel sinjoro Gordon tiam estis dronanta, vivu eterne la memoro pri li, bona estis batalisto...

Ĉiuj silentis iomete, poste la juneco reviviĝis, rekomenciĝis ridego, ŝercoj...

...Vespere de la 16-a de aŭgusto la eskadro ĵetis ankrojn antaŭ la Njuĥĉa salfarejo. Parton de la ŝipoj Petro ordonis koncentri ĉe la monto Risludo, parton kondukis al la Varder-monto. Ĉi tie la floton jam atendis admiralo Crøys[139], griza pro febro. Petro interkisiĝis kun li, diris, kapmontrinte al Apraksin kaj Silvestro Petroviĉ:

— Ili sukcesis, ĝisiris, ĉu, Kornelio Ivanoviĉ? Jen Teodoro, jen Silvestro, kaj kiel ŝipestro sur la eskadro estas Rjabov, rudristo.

Admiralo Crøys malrapide levis rigardon, korektis grandajn ringojn de la peruko, diris per voĉo nelaŭta, sed plena de kaŝita forto:

— Mi havas esperon, Siro, via sanktoleita moŝto, ke en proksima estonteco, kiam la ĉefaj partoj de la floto estos en la Balta maro, mi sukcesos servi al Rusio kune kun miaj junaj kunfratoj sinjoroj Ievlev kaj Apraksin. Mi esperas ankaŭ, ke multaj malbonaĵoj, bedaŭrinde aŭditaj de mi pri eksterlandanoj, svenos kun tempo...

— Nu, nu! — ne rigardante al Crøys, diris Petro. — Nu, ne indas. Ĉe ni, Kornelio Ivanoviĉ, al bona homo estas ĉio — kaj honoro, kaj rangoj, ni ne avaros...

Dum la tuta nokto verŝiĝadis abunda, brua pluvo; ĉe mateniĝo, ne atendante, kiam sekiĝos la tero, oni komencis elŝipigon. Matrosoj, soldatoj, kanonistoj, oficiroj, monaĥejaj servaj kampuloj, trostreĉante sin, kun terura peno eltrenadis el

---

139 Kornelius Crøys (en la norvega) aŭ Cornelis Cruijs (en la nederlanda), en Rusio ankaŭ nomata Kornelio Ivanoviĉ (1655–1727) — rusa admiralo de norvega deveno, la unua komandanto de la Balta floto *(trad.)*

glueca tundra koto pezajn kverkajn afustojn, kanonajn tubojn, barelojn kun faruno, kun salita fiŝo, kun biskotoj, ŝarĝadis sur centojn da ĉaroj, metitaj ĉe la bordo mem, je kiu dispeciĝadis malklara mara akvo. La ĉaroj tuj dronadis ĝis la aksingoj mem, la ĉevaloj stertoris, glitante, faladis en koton. Menŝikov nudpieda (tiele estis pli facile), en kuspita pantalono, per propra mano punadis malsagacajn, neglektemajn, skoldis dekestrojn, poste subite ordonis konstrui lignotabulan pavimon. La elŝipigo estis haltigita, oni metis pastabulojn por ĉaroj, Petro, trostreĉante la gorĝon, malsata, kovrita de vilo, mem instalis ordon, — la afero ekiris pli glate. Ĉevaloj ĉesis fali, ĉaroj ĉesis droni. Nemalproksime de la nova tabula albordiĝejo, sur seka holmeto ĉarpentistoj sub gvido de Silvestro Petroviĉ faradis glitilojn kaj rulilojn por tiuj fregatoj, kiuj devis ekiri trene. Petro venis ankaŭ ĉi tien, per mezurilo mezuris rulilon; elmetinte antaŭen la malsupran makzelon, li pensis, poste kapjesis:

— Do taŭgas!

Lia grandega figuro en mallonga kaftano, en altbotoj, kun nigraj, pendantaj laŭlonge de la vizaĝo malsekaj haroj, jen aperadis sur ŝipoj apud elŝarĝataj holdoj, jen li iradis al la bordo, starante en gigo, jen, enfalante en koton super la genuoj, mezuradis per stango lokon por elŝipigo de trupoj. Same pasie, sinforgese kaj ĉe tio gaje, kun komplikaj diraĵoj kaj insultoj laboris Aleksandro Daniloviĉ. Renkontiĝante en tiu tago jen sur la bordo, jen sur ŝipoj, ili diris nenion unu al la alia, nur interrigardadis kaj kraĉadis, suĉante siajn pipojn.

Reveninte nelonge antaŭ tagmanĝo sur la flagŝipon, Petro lavis sin, ŝanĝis la subveston al la seka, vokis la barbiron.

Filecĵo, la kajut-vaĉanto, alportis al li sur pleto verdvitran glaseton da vodko kaj kringon kun karvio; li eltrinkis, frostosenteme, komforte skuis la ŝultrojn kaj eksidis skribi leteron al sia aliancano Aŭgusto II, reĝo pola.

«Ni nun troviĝas apud la limo malamika, — rapide, per kurbaj, rondaj literoj skribis Petro, — kaj intencas, certe, kun Dia helpo iun entreprenon komenci...»

La skribita frazo tre plaĉis al li per sia ruzeco, li kun plezuro legis ĝin al saĝa Golovin, elaŭskultis aprobon kaj, farinte friponajn okulojn, komencis skribi plu. En la kajuton, ne frapinte, eniris, same ordiĝinta, razita, en brokaĵa kaftano, en ŝuoj kun arĝentaj bukoj, Menŝikov, metis sur la tablon leteron de Ŝĉepotev.

— Kial vi tiel parade vestiĝis? — demandis Petro, pririgardante Aleksandron Daniloviĉ-on.

— Tial mi tiel vestiĝis, ke hodiaŭ estas la tago de mia naskiĝo! — abrupte respondis Menŝikov. — Se neniu memoras, do almenaŭ mi ne forgesis...

— Ĉu? — miris Petro.

Li kalkulis per la fingroj kaj kapjesis:

— Li ne mensogas, ĝuste!

— Jen, ĝuste!

— Legu la leteron de Ŝĉepotev.

Menŝikov malsigelis, legis kun peno, silabe:

«La vojo estas preta, kaj la albordiĝejo same, ankaŭ ĉaroj kaj ŝipoj sur Onego estas kolektitaj multe. Kaj da ĉaroj estas kolektite du mil, kaj ankoraŭ estos aldono, kaj kiom estas da

ŝipoj kaj kun kia mezuro, pri tio estis sendita al via moŝto listo kun ĉi letero...»

— La liston legu! — ordonis Petro, plu skribante la leteron. Menŝikov kunpremis la lipojn, atendis. — Legu la liston! — komandis Petro.

Aleksandro Daniloviĉ legis.

— De Boriso Petroviĉ ankoraŭ estas letero al vi, *Min Her*, — diris li, faldante la paperon. — Petas Ŝeremetev sendi al li Apraksin-on por helpo...

Petro kapjesis:

— Ŝeremetev vane ne petas. Probable, li vere estas necesa. Ni parolos hodiaŭ, rememorigu...

— Mi rememorigos.

Finskribinte al Aŭgusto kaj leginte la tutan leteron al Teodoro Aleksejeviĉ Golovin, kiu jam ekdormetis sur la benko ĉe la muro, Petro komencis leteron al Ŝeremetev.

«Ni kiom eble forte hastos», — skribis li, kaj plu en nebulaj, sed sendube kompreneblaj por Ŝeremetev esprimoj priskribis la malfacilan itineron de sia armeo.

— Ĉu kun kuriero? — demandis Menŝikov, sigelante per vakso la duan leteron.

— Kaj kun tia, ke li viva ne fordonu!

Li ankoraŭ ekrigardis al Menŝikov, diris karese:

— Kiam ni finos la aferojn — festos vian feston. Naskiĝon!

La pordo knaris, en la kajuton eniris la unua piloto Rjabov — malseka plene, kun grandega, ankoraŭ viva salmo en la

mano, diris kun subrido:

— Petro Aleksejeviĉ, mi ĝin kaptis, sed la kuiristo ne prenas, — diras, ne manĝos vi fiŝon...

— Jen Daniloviĉ-on ĝojigu, — respondis Petro, — al li hodiaŭ estas festo. Ordonu al la kuiristo por tagmanĝo friti.

Rjabov eliris, Petro kriis post li:

— Vi kial vian knabon kaŝas? Konduku lin al la carido, ja pli gaje estos por ili duope...

La rudristo ne respondis — kvazaŭ ne aŭdis.

— Estas malfacile por la carido ludi, — prononcis Menŝikov, — ne tiom sana li estas nun.

Petro, globigante la okulojn, demandis per malbonkora voĉo:

— Vi de kie scias — ĉu sana aŭ ne sana? Ĉu vi estas kuracisto?

Sed tuj mildiĝis kaj ordonis:

— Iru rigardi, ke la tablo estu bone primetita...

2. En libera momento

Post tagmanĝo, dum kiu oni drinkis je la sano de la glora sinjoro Menŝikov, sur la flagŝipo, en la admirala kajuto, oni por longe eksidis ĉe kruĉetoj da varmigita biero kun konjako kaj kajena pipro. Dense ekfumis pipoj, tuj komenciĝis disputo, ĉiuj trankvile lokiĝintaj ĉi tie komprenis, ke ili ankoraŭ ne baldaŭ sukcesos tiel sidi kaj konversacii, kiel nun pro la naskiĝtago de sinjoro Menŝikov. Kaj Petro estis trankvila, en kvieta, mokeme

bonkora animstato pasumadis en la kajuto kaj raŭkete parolis:

— Mi neniom malaprobas alĥemiiston, strebantan transformi metalojn al oro, aŭ meĥanikiston, penantan trovi eternan moviĝon, pro tio, amikoj miaj, ke, serĉante tiom senekzemplajn kaj eksterordinarajn aferojn, ĉi doktuloj subite inventas multajn flankajn, sed tre utilajn aĵojn. Kaj tial, sinjoroj konsilio, ne ŝovu viajn longajn nazojn en okupojn de scienculoj, ne enmiksiĝu per viaj rimarkoj, sed ĉiel stimulu tiajn homojn, ĉar veraj frenezuloj faras malon, nomante ekzercojn de scienculoj deliraĵo.

— Sed mi ja, *Min Her*... — komencis Menŝikov.

— Pri vi estas aparta parolo, monaĥa defendanto! — kun la sama bonanimeco en la voĉo interrompis Petro. — Kion vi antaŭ nelonge pri ili diris, pri monaĥoj, ke ili, vidu, tro prematajn estas nun kaj en mizero siajn vivojn trenas. Vi, animo mia, memorfiksu firme: monaĥejajn enspezojn el vilaĝoj uzi endas por dioplaĉaj aferoj kaj por la ŝtato, sed ne por parazitoj. Al maljuna monaĥo en preĝo necesas nutro kaj vesto, sed niaj monaĥoj jen kiel grasiĝis. La pordo al la ĉielo estas kredo, fasto kaj preĝo, kaj mi...

Li paŭzis, ekrigardis rekte al Menŝikov kaj dise, kun moka forto prononcis:

— Kaj mi, Aleksandro Daniloviĉ, pardonu pro tio, purigos al la monaĥoj vojon al la paradizo per pano kaj akvo, sed ne per sterledoj kaj vinoj. Kaj ne respondu la paŝtisto al Dio, ke li malbone observis la perdiĝintajn ŝafojn!

Silvestro Petroviĉ, el malproksime ĵetante rigardojn al la caro, pensis: «Antaŭ nelonge, ankoraŭ en Perejaslavlo, kaj en

Arĥangelsko, kiam estis surakvigata tie la unua por li jaĥto, estis li tute juna, longbraka, longakrura knabo, sed nun li estas viro multsperta, travivinta jarojn de multlabora vivo».

Li kliniĝis al Apraksin, diris al li flustre:

— Kiom rapide pasis tempo post nia juneco, Teodoro Matejeviĉ. Mi rigardas al mi mem, kaj ne povas kredi...

Apraksin pigre ridetis:

— Temo la plej bona — konversacii pri tagoj de nerevenigeble forkurinta juneco. Malmulte da utilo, sed tamen tio pensiĝas...

Li alŝoviĝis al Silvestro Petroviĉ pli proksime, prenis lin ĉe la kubuto, ekparolis mallaŭte:

— Niajn unuajn laborojn ĉu vi memoras? Perejaslavlon Zaleskan, la venojn al Arĥangelsko, la miron pri tiuj fortoj, kiujn ekvidis ni en dvinanoj-pomoroj; ĉu vi memoras, kiel ni konstruis en Vavĉugo kaj Solombalo ŝipojn? Kiom malfacile estis por ni mem — malspertaj, kiom penige, sed vidu — ni sukcesis...

— Ne de ni tio estis farita! — korektis Ievlev. — De la popolo.

— Ankaŭ ni, mi pensas, estas popolo, Silvestro...

— Por ni estas pli facile.

— Ial laŭ vi mi ne vidas, ke estas tiel facile! — ridante respondis Apraksin. — Vi apenaŭ la piedojn trenas... Ne, amiko mia bona, eble post tempopaso ankaŭ nin oni rememoros, ne vane vi kaj mi panon manĝis. Pensojn viajn mi scias: tre multaj homoj mortas, tre malfacile estas nian aferon

fari. Ankaŭ nun — ni eliras al militiro por kuniĝo kun Ŝeremetev kaj Repnin. Ĉu multaj restos vivaj post la militiro? Sed kion fari? Ĉu ne finfari la komencitan? Pensu, sinjoro subadmiralo: ĉu la batalo sur Dvino kaj la savo de la floto nur por si mem estis farita? Ne, tio, kio sub la muroj de la Novdvina citadelo estis komencita, — al la Balta maro iras...

Ievlev silentis.

— Proksima estas la horo, kiam ekvidos ni standardon de kvar maroj. Proksima estas la tempo, kiam ni reprenos al ni ĉion nian. Kaj ke estas malfacile, do kiel alie fari? Kiel?

Petro aliris pli proksime, prenis ambaŭ je la oreloj, kunfrapis per la kapoj, demandis gaje:

— Pri kio vi flustras?

— Pri la samo, Siro! — respondis Apraksin. — Pri la nia, kion ni al ni reprenos...

Petro fiksrigardis Teodoron Matejevič-on, diris, kvazaŭ daŭrigante komencitan penson:

— La fortuno tra ni kuras: beata estas tiu, kiuj kaptas ĝin je la haroj. Kion Karolo la Dekdua implikis per obstino, tion ni devas malimpliki per saĝo. Kaj ĉar tio nun ne helpas, tiam ni malimplikos per forto kaj armilaro, eble kun Dia helpo ni kaptos la fortunon je la haroj. Tamen, ĉio ĉi estas alegorioj, sed jen estas la afero...

Kaj li denove komencis iradi tra la kajuto el angulo en angulon, snufante per la pipo kaj rezonante:

— El ĉio ĉi ni konkludas: la svedon bati eblas. Nun ni batas, batalante du kontraŭ unu, baldaŭ ni komencos venki ilin per

egala nombro, kvankam eble eĉ ne baldaŭ, sed ĝuste nun ni tiel faras. Jen en julio frakasis ni svedajn ŝiparojn sur la Ĉuda kaj Ladoga lagoj, samtiam Ŝeremetev renversis Schlippenbach-on ĉe bieno Hummelshof. Tutan infanterion svedan li batis, el ses mil apenaŭ kvin centoj saviĝis; ĉiuj kanonoj, ĉiuj standardoj estas ĉe ni. Schlippenbach en granda konfuzo apenaŭ sukcesis fuĝi al Pernovo. Ievlev Silvestro, glora nia subadmiralo, eskadron de frato nia Karolo sub la muroj de la fortreso Novdvina same disbatis plene...

La pordo de la kajuto larĝe malfermiĝis. En malseka mantelo, en profunde surŝovita trikorna ĉapelo, en kotkovritaj altbotoj eniris nekonata oficiro, serĉis per la okuloj la caron, riverencis en la malnova maniero — malalte, kun peno malbutonis per nefleksiĝantaj fingroj sakon, elprenis leteron. Petro, kuntirinte la brovojn, etendis la manon, ordonis:

— Fajron!

Menŝikov prenis de sur la tablo kandelingon, lumis. Petro legis longe, lia buŝo abrupte moviĝis, li forte kunpremis la dentojn, poste diris, glutinte bulon en la gorĝo:

— Mi gratulas vin, sinjoroj konsilio, pri neatendita feliĉa viktorio: la dektrian de aŭgusto Petro Apraksin plene frakasis armeon de sveda generalo Cronhjort ĉe rivero Iĵoro... Vivu sinjoro Apraksin kaj lia glora taĉmento!

Ĉiuj leviĝis de siaj lokoj, puŝante unu la alian ekiris al la granda tablo, sur kiu estis sternita mapo. Samloke, instaliĝinte sur benko, estis dormanta la oficiro, kiu alportis la bonan sciigon. Laŭ la vizaĝo de la dormanto estis videble, ke li morte laciĝis. Menŝikov kaj Apraksin tenis kandelingojn, rigardis, kiel iris la rusaj trupoj laŭ rivero Nevo ĝis Tosno kaj ĝis la

Iĵora tero. La caro per granda, alveturigita ankoraŭ el Nederlando krajono desegnis sur la mapo sagojn. Unu sago tuŝis per la pinto Nienŝancon...

— Bone li batis! — diris Golovin.

— Nun ĉi tien ĉiuj rigardu! — ordonis Petro kaj per la krajono strekis kurban linion — tio estis la vojo, laŭ kiu moviĝis kolonelo Tirtov, pelante antaŭ si la svedojn. — Jen kien pelis — en Noteburgon...

Li strekis grandan rondon. En la rondo estis du fortresoj — Noteburgo en la Ladoga buŝo de Nevo, kaj Nienŝanco — ĉe kuniĝo de Oĥto kun Nevo. Ĉiuj silentis. Ĉio estis tute klara.

— Ĉe mateniĝo ni ekiras! — diris Petro. — Nun — dormi...

La admirala kajuto malpleniĝis. Petro blovestingis troajn kandelojn, vokis Apraksin-on, kiu estis foriranta la lasta:

— Eksidu, Teodoro, sidu iom...

Apraksin malleviĝis sur la benkon, ekrigardis al Petro. Tiu plu staris super la mapo, pensis, poste ekparolis senhaste:

— Mi bedaŭras lasi vin foriri, sed mi nenion povas fari. Ŝeremetev petas vin — al li mi ne donas: ŝipojn necesas konstrui — multege, kaj por tiuj ŝipoj — konstruejojn. Faru en mia nomo kiel necesas, nenion domaĝu...

Teodoro Matejeviĉ aŭskultis silente, trankvile rigardis per siaj saĝaj, komprenemaj okuloj en la okulojn de Petro.

— Nenion domaĝu! — ripetis Petro. — Nun oni babilas: popolo mortas... Oni babilu, ĉiuj estas mortemaj. Sed en la Balta maro ni estos mastroj, ĉar sen ĝi kiom multe ni spertas perdojn kaj malprofitojn, kaj komercas malbonege. Ŝipoj

necesas, floto, Balta floto...

— Kiam vi ordonos veturi, Siro?

— Jam hodiaŭ veturu!

— Mi veturos.

Li mallonge suspiris, la caro tiris lin je la maniko, konsolis:

— Restos ankaŭ por vi milito. Longe ankoraŭ, Teodoro Matejeviĉ, ne morgaŭ ni finos, ne por unu tago estas laboro. Vi ne ĉagreniĝu!

— Ja mi ne...

— Vi ĉe mi estas admiralejestro, por vi estas multe pli malfacile, batali ja estas pli simple, ol konstrui...

Akompaninte Apraksin-on ĝis la pordo, li vokis Menŝikov-on kaj eksidis al la tablo. Daniloviĉ venis oscedante, en noktaj peltaj pantofloj, dormema...

— Mi jam kuŝiĝis dormi...

— Ja vi la vian ne perdas. Mi pensas, vi jam satdormis?

Daniloviĉ oscedis, frotis la vangojn per la polmoj, grakis, tiris sin:

— Vi nin elturmentis, patro, *Min Her*, mankas fortoj...

— Ne eblas vin elturmenti, tiaj vi naskiĝis. Ordonu, kara infano Aleksaĉjo, bati tamburojn, ludi al klarionistoj, fari al la tuta armeo grandan alarmon. Dum ili prepariĝos — venos mateno. Ne scipovas ni ankoraŭ rapide, militiste prepariĝi, ne ellernis. Iru, Aleksaĉjo, komencu!

Aleksandro Daniloviĉ ankoraŭ gratis sin, longe oscedis, foriris, sed preskaŭ tuj en egala bruo de pluvo, en aŭtuna

Blankmara humido kaj nebulo — ekkantis klarionoj sur ŝipoj, ekbatis tamburoj sur la bordo, kie en tendoj estis tremantaj kaj frostiĝantaj dum dormo soldatoj. Sur la ŝipoj de la eskadro ekbrulis konvenciaj fajroj. La tuta tendaro ekmoviĝis, ekknaris neŝmiritaj aksoj de ĉaroj, ekhenis ĉevaloj, ekbrulis torĉoj. Petro rigardis en la fenestron, mirante kaj ĝojante pri Menŝikov: li scipovas fari aferon, rapidas kiel fulmo, aglo!

Sub sonoj de klarionoj, sub tambura rulado li eksidis finskribi la leteron al Ŝeremetev:

«Bonvolu, via moŝto, senprokraste veni mem urĝe al ni en Ladogon: tre necesas, kaj sen tio alie esti ne povas; pri la cetero, kiel pri aldonaj trupoj, tiel pri artilerianoj, bonvolu aranĝi laŭ via dispono, por ĉi donitan de Dio tempon ne perdi...»

Plu skribante, li vokis la kajut-vaĉanton, por ke tiu voku al li la edukiston de la carido — germanon Neugebauer-on. La edukisto venis tuj, en nokta mantelo, en vata noktoĉapo, riverencis ĉe la pordo.

Petro estis skribanta, snufante. Neugebauer longe atendis, poste tusis. Petro turniĝis, abrupte en la germana demandis, kiel fartas la carido.

— Lia princa moŝto ploras, — respondis la germano.

— Pro kio do?

La germano ŝultrolevis.

— Vesti la caridon kaj prepariĝi al vojaĝo! — ordonis Petro. — Kaj sen prokrastoj!

Neugebauer ree ŝultrolevis.

— Iru!

La germano foriris kankre, riverencante. Petro sigelis la leteron al Ŝeremetev, surmetis mantelon, eliris sur la pobferdekon — observi moviĝon de la trupoj.

3. La cara vojo

Jam mateniĝis.

Grandegaj amasoj de soldatoj, matrosoj, fusilistoj, kanonistoj iris tra la vilaĝo en malklara lumo de venanta tago, sub pluvo. De tempo al tempo ĉaroj fiksiĝadis en kavoj, fajfadis knutoj, en la amaso aŭdiĝadis: «ku-u-une, ĉiuj prenu!» Unu ĉaro trairadis, kaj tuj fiksiĝadis alia, ree aŭdiĝadis insultado, kaj homoj ĉiam iradis, iradis, iradis laŭ la mallarĝa strateto de Njuĥĉo, neniam vidinta tian abundon de homoj.

Kaj sur altaĵo, sur sekaĵo estis strange vidi du fregatojn, «Kurieron» kaj «Sanktan Spiriton», kiuj kvankam malrapide, sed tamen moviĝadis, kvazaŭ naĝis inter miloj da homoj, trenantaj ŝnuregojn, submetantaj rulilojn kaj glitilojn.

Petro krucosignis sin, suspiris, ne retrorigardante al la sekvantaro, silente malleviĝis laŭ la ŝtuparo, por atingi la armeon. Maljunulinoj kaj maljunuloj, infanoj kaj junaj virinoj — Njuĥĉaj malnovritanoj rigardis ne sen timo al la rapide paŝanta sur glueca koto nigrahara, kun pipo en la dentoj caro de la tuta Granda kaj Malgranda kaj Blanka Rusujo[140]. Li iris ne rigardante sub la piedojn, glitante, morna kaj zorgigita, iomete elstariginte antaŭen unu ŝultron laŭ sia maniero, svingante la

140 Parto de la oficiala titolo de la monarĥo de Rusujo ekde la 17-a jarcento. Malgranda Rusujo — nuna Ukrajnio, Blanka Rusujo — nuna Belorusio, kies nomo fakte litere signifas ĝuste tion: «blanka Rusio» *(trad.)*

longajn brakojn, kaj post li hastis kajut-vaĉanto Fileĉjo kun cara ferita kofreto, barbiro, gravmiena, malrapide pensanta kuiristo Velten, deĵoranta servosoldato Snegirev, fremdlanda kuracisto...

Maljunulo, akompanante la caron per rigardo, krucosignadis sin, balancadis la kapon, malnovrita popo de Njuĥĉo Hermilo balbutis:

— Kien ilin, herezulojn razmuzelajn, hundaspektajn, la diablo pelas? Ho, malfeliĉo, malfeliĉo! Certe, por detrui niajn monaĥejetojn kaŝitajn, sed ili ne trovos, dronos en marĉegoj, estos ili englutitaj, pereos la diabloj, maliculoj, nikonanoj damnitaj, pipfumantoj... Pu, for, sonĝo...

Kaj vere, kvazaŭ sonĝo malaperis la cara armeo, kvazaŭ halucino — kovriĝis per flava Blankmara humida pluvnebulo. Kaj en la antikva vilaĝeto Njuĥĉo ĉio restis kiel antaŭe, nur malĝustatempe komencis interkrii virkokoj, kaj freneza vilaĝano Teofilakto, kovrinte per la polmoj la kalvan kapon, ululetis ĉe la vilaĝa rando:

— Aj, ve al mi, aj, patro-patrino, fratoj-fratinoj...

Kaj kadukaj maljunuloj, apogante sin al bastonoj, plu rigardis postsekve al la pipfumanta caro, balancadis la kapojn, interflustradis:

— Vere — la Antikrista veno!

— Pu, dispeciĝu!

— Pro niaj pekoj nin punas la Sinjoro!

Kiam ili eliris el la vilaĝo, Menŝikov diris al Petro:

— Satglutos ni malfeliĉon, *Min Her* Piter!

Petro respondis morne:

— Kaj mi pri tio eĉ ne sciis. Ĉu vere satglutos?

Kaj, svinginte la manon en direkto de la fregatoj, kiuj estis knarantaj kaj ululantaj sur glitiloj, li malmilde prononcis:

— En nian propran maron, kvazaŭ latronoj, niajn ŝipojn laŭ seka vojo ni tiras. Nu, atendu, frato nia Karolo, ne tiom longe ni lernos, en proksima tempo instruato iĝos instruito...

Aleksandro Daniloviĉ ekkraĉis trans la ŝultron:

— Pu, pu, pu, ja ne ŝatas mia koro, *Min Her*, kiam vi tiele rezonas kaj kalkulas. Kial anticipi, ĉio estas en la Dia mano!

Tage la militistaro trairis ankoraŭ vilaĝeton je deko da kortoj, Sanktan monton kaj Sanktan lagon. Marĉo tute likviĝis pro seninterrompa pluvo, grunda vojo tute kotiĝis, laboro de kvin mil kampuloj, alpelitaj por konstruado de la cara vojo, malaperis ĉi tie vane. Preobraĵenskanoj, irintaj ĉe la kapo de la kolumno, haltis; kampuloj el Solovkia, Kargopola, Oloneca, Belozerska bienoj ĝiszone en putra marĉa akvo estis farantaj foskavojn, forigadis akvon, surmetadis novajn fasĉinojn. Bombardista serĝento Miĥaelo Ŝĉepotev diris al Petro:

— Pli ol duonon de via vojo, Siro, marĉoj kovras. Kaj marĉo, diablo ĝin prenu, estas likva. Kiom da popolo ni enterigis dum konstruado — ne eblas kalkuli. Moskitoj pikas, malseko, humido, malvarmo. Mi tuta per furunkoj kovriĝis, pensis: tempas ankaŭ por mi, lacigis min la vojo...

Petro sidis sur faligita putra arbo, mezurante per cirkelo mapon, ronĝis la buŝaĵon de la pipo.

— Ĝuste tiel rezultas! — diris Ievlev. — La serĝento ĝuste

kalkulis: de Vardegoro ĝis Voĵmosalmo estas cent dek naŭ verstoj, el ili sesdek ses estas kovritaj per tabuloj. Kaj por la Poveneca distrikto prenu ankoraŭ sesdek...

— Nur la fasĉinojn pliajn pluvoj ne difektu, — diris Petro. — Pluvas senĉese...

— Kaj ke pluvas — estas malbone, sed la plej malbona estas tio, ke kampuloj fuĝas, — suspiris la bombardista serĝento. — Kaj sincere dirante, Siro, tio estas mortkondamnita popolo. Viva el ĉi tie laboranto ne eliros...

Kuriero sur ŝvita ĉevalaĉo, alrajdinta el vilaĝeto Perma, rakontis, ke pluen iri eblas, fasĉinoj kuŝas firme, akvo ne leviĝas. Tien, al Pul-lago, estis kondukitaj pli ol du mil homoj, sed pro malbona gardo pli ol cent foriris. Sed necesus fari defluigajn fosaĵojn, gardi sin, ĉiu paro da laboraj manoj estas valora...

— Timigos ni la kampulojn! — promesis Petro.

Kaj ordonis por minaco kaj averto tuj mortekzekuti per pendumo du fuĝintajn laborulojn, kiuj estis kaptitaj ĉe la kordono — ili penis foriri de la marĉa bagno.

En malvarma humido, sub pluvo obtuze batis tamburoj. La kampulojn oni ektrenis al kanabaj maŝoj. Petro staris proksime, observis el sub la frunto per peza rigardo trankvile, kiel la kampulojn haste konfesprenas kaj komunias la kampa popo, kiel pendumas la armea ekzekutisto. Post plenumo de la ekzekuto li movis la ŝultron, diris al Menŝikov:

— Jen, kara infano Aleksaĉjo, tiele! Ankaŭ proprulon mi ordonos pendumi, se li malbone faros. Por ni revena vojo ne ekzistas. Ĉu vi komprenis?

Menŝikov, kuntirinte la brovojn, ne respondis.

En tagmezo regimentaj klarionoj ekhurlis alarmon: iri pluen. La laborulojn oni pendumis ruze, ĉiuj trupoj nun devis iri preter la du longaj kadavroj kun malhelaj, grandaj, raspaj manoj de laboristoj. La unuaj, kiel ĉiam, ekiris la preobraĵenskanoj — paŝante po kvar en vico, strabis al la mortuloj. Post la preobraĵenskanoj ekiris regimentoj de gvardio de Meŝĉerskij, Kropotov, Volkonskij, post la soldatoj trene ruliĝis la fregatoj, poste bruis sur fasĉinoj ĉaroj kun rezervaj traboj por pontoj, kun tabuloj, kun najloj. Pasante preter la pendumitoj, kaj soldatoj, kaj matrosoj, kaj oficiroj krucosignadis sin rapide, kaŝe flustradis:

— Vi ellasas Vian servanton en paco...

Kaj suspiradis mallonge.

Sur ĉiu versto de la bagna vojo staris gardoj — senripoze riparadis fasĉinojn, defluigadis akvon, submetadis ŝtipojn sub la vojon. Sub la fregatoj krakadis kaj fleksiĝadis tabuloj. Kvazaŭ spite, senĉese bruis egala pluvo, la nuba ĉielo promesis nenion bonan. Jam en la dudeka versto ĉevaloj, enjungitaj al la ŝipoj, komencis fali. Ilin oni mortpafadis, kampuloj-gardantoj fortrenadis ilin de la vojo de la armeo, tuj senfeligadis, kuiradis apud siaj branĉkabanoj supon, avide manĝis ĝin varmega.

Tiel venis humida krepusko de la unua tago de la militiro.

Petro eĉ unu fojon ne eksidis en sian kariolon, peze paŝadis apud la fregato «Kuriero», iam mem submetadis rulilojn, faradis tion pli bone, ol aliaj. Al ĉiu fregato estis enjungitaj po cent ĉevaloj, sed ili ne estis sukcesantaj, oni devis enjungi po cent dek, cent dudek, cent tridek.

Kiam tute malheliĝis, klarionoj ekkantis signalon «ripozo». Pasinte dudek sep verstojn, la armeo faris noktan bivakon en arbaro post Ostruĉjo. Por Petro Aleksejeviĉ oni metis por noktado kabaneton, similan al tiuj, kiujn konstruas por si vintrumantoj; soldatoj grimpis sur arbojn, kiu havis ŝancon — falis sur podiojn, kiajn faras por si ursoĉasantoj, aliaj dormetis ĉe lignofajroj...

Kaj malproksime malantaŭe, apud la pasita tretita, rompita vojo, jam surverŝata de malklaraj marĉaj akvoj, sub susurado de pluvo, senmove pendis la du laboruloj. El obskuro, de malsupre al ili avide rigardis favaj lupoj, iliaj okuloj malbone brilis en densa mallumo de aŭtuna nokto. Poste unu — adolta, kun kavaj flankoj, kun elstarantaj ripoj — levis la akran muzelon kaj ekhurlis. La hurlo transdoniĝis pluen, laŭ marĉoj, laŭ densejo, al la bivako de la trupoj. Ivaĉjo maltrankvile ekmoviĝis, Rjabov glatumis la vangon de la filo, diris nelaŭte:

— Dormu, infaneto! Lupoj hurlas, sed vi ja ne timos...

— Mi ne timos, — per dorma voĉo respondis la knabo.

— Ili estas malproksime. Tiom malproksime, ke eĉ ne indas timi. Dormu, knabo!

En la dua tagnokto de la vojo ekmalsanis pli ol cento da homoj, en la tria tricent dudek, poste malsanulojn oni ĉesis kalkuli. Soldatoj, matrosoj, oficiroj, laboruloj restadis morti en arbaro — po dek, po dudek homoj. Al ili oni lasadis biskotojn, farunon, sekan fiŝon, lasadis ankaŭ armilojn — por defendiĝi kontraŭ bestoj, dum estos fortoj.

Petro maldikiĝis, aspektis malbone, lin turmentis febro, sed la globaj okuloj plu rigardis kun morna firmeco. Kaj la longaj

kruroj en grandegaj, kun trivitaj kalkanumoj altbotoj same plu paŝadis apud la fregato.

Carido Aleksio kun sia nazparolanta germano veturadis en Berlina kaleŝo, el tie fojfoje aŭdiĝadis liaj kapricaj krioj kaj longa plorado. La caro neniam demandadis, kio estas al la knabo, nur malŝate mienis. Silvestro Petroviĉ, Menŝikov kaj Golovin trotis sur malaltaj, sed fortikaj kaj eltenemaj tataraj ĉevaletoj.

La unua piloto kun la filo penis iri en la ariero de la kolumno — estis malagrable pensi, ke Ivaĉjo, se li trafos antaŭ la okulojn, estos denove postulata al la carido. Ivaĉjo paŝadis brave, ne ploretis, sed en dormo, en bivakoj, ploris kaj plendis, ke «doloras la piedoj». La rudristo frotadis al la filo la piedojn per vodko, kaj kun aŭroro Ivaĉjo ree elpaŝadis malfacilajn verstojn de la cara vojo.

La ŝipaj majstroj Koĉnev kaj Ivano Kononoviĉ estis akompanantaj la fregatojn. La movado de la ŝipoj estis la plej malfacila afero en la militiro. De tempo al tempo necesis elpensi, kiel treni la fregatojn supren, kiel transpasigi ilin trans marĉojn, kiel fari, ke ili ne fiksiĝu sur ŝtonoj. Ĉevaloj faladis unu post alia, novajn trovi oni ne sukcesis. Elturmentitaj, malfortiĝintaj, maldikiĝintaj homoj anstataŭadis ĉevalojn, enjungiĝadis per centoj, caro Petro per rompita voĉo kriadis:

— Ku-une prenu! Akor-de prenu! Faru, trenu!

Laŭ tamburado la tuta kolumno devis iri por helpo al la fregatoj. La tamburo batadis multfoje dum tago, «Sankta Spirito» kaj «Kuriero» ree ekmoviĝadis, knaradis sur ruliloj, sur fasĉinoj, sur tabuloj...

Pamburg la tutan vojon iris perpiede, fumadis pipon, drinkadis pipran vodkon el flasko, diradis al Silvestro Petroviĉ:

— Tio ne povas esti, sed tio estas! Ĉi tie iri ne eblas, sed vi iras! Per ĉi vojo atingi la celon ne eblas, sed vi ĝin atingos! Ho-ho, mi dezirus ĝisvivi la finon de via militiro, por rigardi al komenco de mirinda kaj glorinda tempo, kiu nepre malfermiĝos...

Ievlev lace subridadis.

Laŭmezure de malproksimiĝo de la bordo de la Blanka maro la vojo iĝadis pli seka kaj pli arbara. Sed plu malfacilaj estis transpasoj de riveroj. Ĉeloj, sur kiuj estis metitaj pontoj, ne eltenadis la pezon de la fregatoj, komencadis subfali traboj, tabuloj. La armeo haltadis, laboruloj refaradis la ponton. Oni transpasadis larĝajn trafluejojn ankaŭ sur flosoj...

Riveretoj Ĉiĵma, Ostreĉje, Imeleksa, Klaza, Perma, Rezka restis malantaŭe, en la kvina tago de la vojo oni komencis transpasi sur flosoj riveron Vigon — larĝan je ducent kvindek klaftoj, kaj poste antaŭ vespero la armeo ekvidis belegan lagon, tutan en etaj, mirindaj insuletoj, brilantan sub radioj de la aŭtuna, nevarmiganta suno.

Ĉi tie Petro kunvokis konsilion: kiel iri — ĉu ĉirkaŭire aŭ konstrui flosantan ponton. Timoteo Koĉnev, tute ŝvelinta pro kulaj pikoj, per malvarmuma, neaŭdebla voĉo diris, ke necesas fari flosantan ponton. Ivano Kononoviĉ kun Rjabov kaj inĝeniero Jegoro Rezen ekiris en boateto fari mezurojn; Rezen skribadis ciferojn sur papero, Ivano Kononoviĉ mezuradis, Rjabov remadis per du kurbaj remiloj.

Dum tago oni konstruis la ponton. Kanonoj, ĉaroj kun

kuglegoj, kun pulvo, trupoj — ekmoviĝis tra la lago.

— Ni jam longe iras! — diris Ivaĉjo al la patro. — Indus jam ĝisiri...

— Vin ja oni ne tro vokis, — respondis la rudristo. — Vi mem trudiĝis.

— La plandumo, vidu, deŝiriĝis! — plendis Ivaĉjo. — Dum noktumo indus meti novan.

— Jen al vi estos plandumo, kiam vi hejmen revenos! — promesis la rudristo. — Falos vi al la piedoj de la patrino, malobeanto... Vidu, kiel vi maldikiĝis, solaj ostoj de knabo restis...

Kiam ili estis leviĝantaj de la ponto sur krutan bordon, Ivaĉjon vokis Silvestro Petroviĉ:

— He, baptofilo, eksidu kun mi sur la ĉevalon, ni veturos duope, eble estos pli gaje!

— Mi pensas, sen tio mi ĝisiros, ne mortos! — respondis Ivaĉjo.

Sed li ne eltenis la tenton, eksidis sur la ĉevaltukon, ĵetitan antaŭ la selo. Silvestro Petroviĉ reĝustigis sur la knabo ĉapon, suspiris:

— Kiom vi malpura estas, knabo!

— Ni ĝisiros — laviĝos...

— Kaj la kolo en ulceroj... vidu — vi tuta kovriĝis...

— Kuloj — konata afero...

— Hejme sur forno, mi pensas, estus pli bone... Vi dormus kiom dezirus, kaj poste brasiksupon manĝus, kaj sub la

sorpujojn irus ludi. Eble, ankaŭ la fraŭlinoj vin vizitus...

Ivaĉjo severe silentis.

Kun ĉiu tago oni iris ĉiam pli rapide, nun jam sciante, kiel superi malfeliĉojn, kiuj en la komenco de la vojo ŝajnis nekorekteblaj. El amaso de la armeo — gvardianoj, matrosoj, kanonistoj, el ĉaristoj-kampuloj, el laboruloj, akompanantaj la armeon, — nerimarkeble, iom post iom distingiĝis lertuloj, ruzuloj, kiuj estis pli eltrovemaj, inteligentaj, kiuj konis la vojon. Ilin fojfoje kunvokadis Petro, ili ĉiuj kriadis unu al la alia, kverelis, — ĉi tie, ŝajne, ĉiuj estis egalaj: soldatoj kaj oficiroj, kampuloj kaj bojaroj. Petro nomadis ilin ĝentile, kun ruzeco en la voĉo «sinjoroj konsilio» kaj pro aroganteco ne ofendiĝadis, kvankam kelkfoje batis speciale obstinajn konsilianojn.

Kiam ili transpasis krutan, malfacilan Maselan intermonton kaj ekiris malsupren, iĝis pli facile. La homoj gajiĝis. Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov subite, kvazaŭ simpla soldato, la unua komencis kanton. Lia voĉo estis varma, kortuŝanta, soldatoj ĝoje kunkantis, vento vaste disportis sur la altaĵo, super la rusaj standardoj, super la regimentoj, super la fregatoj kaj ĉaroj fierajn demandajn versojn de la kanto:

Jen pri nia do pri vivo sankt-Rusuja:
Do pro kio ĉe ni komenciĝis nia vasta mond'?
Do pro kio ruĝa estas nia varma sun'?
Do pro kio estas juna nia hela lun'?
Do pro kio oftaj estas niaj steloj?
Do pro kio noktoj niaj estas nigraj?
Do pro kio havas ni aŭrorojn en matenoj?
Do pro kio havas ni ventojn fortajn?

— Kio estas tiu kanto? — demandis Pamburg de Ievlev.

Silvestro Petroviĉ ekridis:

— La kanto estas spirita, sed ili kantas ĝin en sia maniero, en la soldata.

Pamburg balancis la grandan kapon, diris kun gaja miro:

— Diablo prenu vin, kia vi estas popolo!

Ievlev sur sia ruana virĉevalo rajdis al la kapo de la kolumno, Pamburg prenis ŝipestron Varlan-on sub la brako, palpebrumis al li, promesis:

— Mi donas vorton de honesta homo pri tio, ke ili prenos Noteburgon kaj eliros al la Balta maro. Kaj ĉu vi scias? Ili farus tion ankaŭ sen ni, jen kio estas la plej malgaja.

— Kaj eble, povas esti, eĉ sen sia caro Petro, — diris Varlan, — se vi deziras scii...

Je tago da vojo ĝis Poveneco la kolumnon renkontis Jegorĉjo Pustovojtov, sendita antaŭen, diris al Petro, ke boatoj sur la lago estas pretaj, ke oni buĉas brutaron — viando estos sufiĉa por la armeo, ke banejoj estas hejtataj ĉiuloke. Al Ivaĉjo Jegorĉjo alveturigis en la dusako freŝajn sekalajn flanojn, kazeon kaj frititan virkokon.

Ivaĉjo komencis manĝi, poste subite ektimis:

— Se mi tromanĝos — la piedoj ne iros. Jam kiam mi ĝisiros, manĝos. Ĉu mi pravas, paĉjo?

— Ĉu vi laciĝis? — demandis Jegorĉjo.

— Ne gravas, mi kutimiĝas.

Li levis al Jegorĉjo la maldikiĝintan, en fluaĵoj de koto, en

ulceroj vizaĝon, palpebrumis, fanfaronis:

— Kiom da homoj dum la vojo falis, sed mi iras — superas...

— Vi, oni scias, estas viro eltenema! — diris Jegorĉjo.

— Eltenema aŭ ne, sed mi ne falis. Kaj sur ĉaroj preskaŭ ne veturis. Nur eble kun Silvestro Petroviĉ...

Ĉe vespera aŭroro de la 27-a de aŭgusto la kapo de la kolumno eniris en Povenecon. La plej malfacila parto de la vojo estis trairita. Soldatoj kaj matrosoj, demetante la ĉapojn, krucosignadis sin, viŝadis ŝvitajn vizaĝojn, interŝanĝadis ŝercojn. Tamburistoj po ses homoj en vico batis paradan marŝon, blankkapaj knaboj-povenecanoj en ekstazo kankroiris antaŭ la armeo. Kantis matrosaj ŝipaj klarionoj. Petro, sidante en selo, per la okuloj kalkulis sian armeon: ĝi iĝis duoble malpli granda, ol tiu, kiu eliris el Njuĥĉo.

Matene, ĉe aŭroro, Petro kun Ievlev, Pamburg kaj Varlan komandis mallevon de la fregatoj en akvojn de la Onega lago. Estis vento, super plaŭdanta ebenaĵo de Onego malrapide naĝis plumbe nigraj nuboj. Timoteo Koĉnev, tute ĉifona, en peĉo kaj fulgo, per raŭka, suferanta voĉo kriadis al matrosoj:

— Malpli abrupte faru, malpli abrupte, kanajloj! Nun akorde prenu; akorde...

Soldatoj surboatiĝadis. Al la bordo laŭ nove metita vojo rampis kanonoj, ĉaroj kun kuglegoj, kun pulvo. Fumis lignofajroj, sur kiuj estis kuirata kaĉo. Komandantoj kolektadis siajn homojn, nomvokadis antaŭ surŝipigo, distribuadis, kiu remos, kiu levos velojn, kiu sidos ĉe rudro. La homoj gajiĝis, serĝentoj insultadis senkolere, por ordo. Ŝĉepotev diris al

Golovin:

— Nun la popolo tiel rezonas: nun ni vivos, ne mortos tuj. Kaj vere, Teodoro Aleksejeviĉ, tian vojon trairi eĉ en sonĝo oni ne povus vidi...

Golovin subridis:

— Kia sonĝo! Vidu — vi maldikiĝis duoble, la pantalono ne tenas sin...

Ivaĉjo kun la patro venis al la akvo el banejo, varmiĝintaj, sataj, la knabo miris:

— Granda lago ja! Kiel maro. Kaj la rando ne videblas...

— Vi vidos baldaŭ...

— Onega! — penseme diris Ivaĉjo kaj subite rapide ekkaŭris.

— Kial vi? — demandis Rjabov.

— Ja jen la caro rigardas! Li ree ordonos kun Aleĉjo sia ludi! Li min eĉ tutan per oro kovru — mi ne iros...

4. Tempas kutimiĝi

Sur «Sankta Spirito» jam estis hejtata la kuirejo. Carido Aleksio, krakante per la fingroj, skuante la kapon, iradis tra la kajuto, plendadis al la edukisto-germano:

— Al mi doloras la ventro. Kaj ĉi tie, en la brusto, same estas pikdoloro. Li ordonu al mi veturi en Moskvon. Alie mi mortos.

Neugebauer ŝultrolevis.

— Stultulo! — kriis la carido. — Stultulo! Vi povas nur ŝultrolevi! Stultulo!

La cara kuiristo Velten estis primetanta la tablon, metadis manĝilarojn. La fregato estis balanciĝanta, knaranta sur laga ondo, la teleroj moviĝis sur la tablo. La carido plu krakadis per la fingroj, poste falis sur la plankon, komencis frapi per la piedoj, krii:

— En Moskvon, en Moskvon, ho-o-o!

Neugebauer kliniĝis al Aleksio, tiu batis lin per la genuo al la brusto, ekŝrikis ankoraŭ pli laŭte. Tiutempe Petro eniris en la kajuton, haltis ĉe la pordo, klininte la kapon, silente atendis, ĝis ĉesis ŝriki Aleksio. En la estiĝinta silento per malbonkora voĉo la caro ordonis:

— Se vere estas malsana la carido — iru!

Aleksio sidiĝis sur la planko, mallerte, apogante sin per la manoj, turniĝis sur la flankon, ekstaris. Petro rigardis al li el malproksime, kiel al fremdulo.

Kiam la pordo post Aleksio fermiĝis, Petro suspiris, kriis al Velten doni tagmanĝon. Li manĝis, ne rimarkante, kio estis donita, samloke, apud teleroj, skribis leteron al reĝo Aŭgusto: «Ni nun en militiro apud malamika limo troviĝas kaj kun Dia helpo ne atendas esti sen laboro...»

Eniris Menŝikov, Petro diris al li kolere:

— Vi ordonos atendi vin por tagmanĝo, ĉu?

— Sed mi ne povas disŝiriĝi! — respondis Aleksandro Daniloviĉ. — Kiom da aferoj estas hodiaŭ...

— Ĉu ili sukcesas? — plu skribante, demandis la caro.

— Iel-tiel, iom post iom.

Li eksidis, verŝis por si glaseton da vodko, eltrinkis, almanĝis. Petro Aleksejeviĉ finskribis la leteron, Menŝikov rakontis:

— Gratulon al vi pro neatendita ĝojo, bombardisto. Kuriero alrajdis, hodiaŭ kolonelo Tirtov ĉe Keksholmo plene frakasis eskadron de Nummers...

Petro malfermis la buŝon, iom poste kriis:

— Mensogas vi!

— Ĉu mi ĵuru per Dio?

— Kie estas la kuriero?

— Ja tie, kie ĉiuj ili, diabloj buntaj: falis dormi. La ŝipoj de Tirtov kunkroĉiĝis por ŝipatako kun velŝipoj, du svedajn ŝipojn ili bruligis, du kaptis. La svedoj, ne ĝisatendinte helpon, foriris el Ladogo.

Menŝikov prenis per la manoj pecon de ŝafa flanko, komencis ĉirkaŭmanĝi.

— Plu diru! — kriis Petro. — Kio poste estis?

— Viktorio estis. Tempas, Siro, kutimiĝi! — ŝmacante, respondis Aleksandro Daniloviĉ. — Ĉirkaŭ tricent svedoj pereis, kvin ŝipojn ili perdis... Mi bedaŭras pri Tirtov — mortigis lin la diabloj per mitrajlo... Ne gravas — ni kvitiĝos, ĉion rememoros. Por mi Tirtov forpasinta estis bona amiko, mi pro li la animon elskuos el ili...

Li viŝis la manojn, leviĝis:

— Prepariĝi al ekiro, ĉu? Jam ne estas frue. Mi ordonos

velojn levi, kiel vi diros?

— Batu alarmon!

Menŝikov eliris, tamburoj ekbatis «militiron».

Antaŭ vespera aŭroro finfine ekblovis favora vento.

Petro estis sur la bordo, akompanante la caridon. Aleksio staris apud la kaleŝo, klininte la kapon, alpreminte la brakojn per la kubutoj al la flankoj, tre pala. Liaj lipoj tremeradis — li estis tuj ekploronta.

— Vi devas riverenci al via patro, lia sanktoleita moŝto! — dolĉe diris Neugebauer.

— Vi, Aleĉjo... — komencis Petro kaj eksilentis.

La carido rapide levis al la patro la grandajn, profundajn, timoplenajn okulojn kaj ree mallevis.

Petro Aleksejeviĉ paŝis al la filo, prenis lin je la ŝultroj per siaj fortaj, grandaj polmoj, kliniĝis kaj maloportune alpremis la knabon al si. Tiu ekspiris mallonge, plorsingultis, alpremiĝis al la patro, odoranta je peĉo, tabako. Petro karese kaj forte kisis la filon al la pala vango, taŭzis la molajn harojn kaj ekparolis, kliniĝinte, mallaŭte, tiel, ke neniu aŭdu:

— Vi, Aleĉjo... ne gravas, atendos, pli elkreskos, tiam ekiros kun mi en militiron. Nun por vi estas malfacile, malforta vi estas ĉe mi, mi pensas, estas ĝene. Sed kun tempopaso...

Aleksio plorsingultis, ekploris, Petro de li depaŝis, diris al Neugebauer:

— Kial li ĉe vi ĉiam ploras... Prenu... Veturu...

Kaj, ne retroturniĝante plu al la kaleŝo, li ekiris al «Sankta

Spirito», kie razita ĝis bluo Pamburg, starante sur la pobkastelo, en la kripligita rusa lingvo estis krianta konvenajn por vera maristo piprajn vortojn...

— Ĉu ni debordiĝu, *Min Her*? — demandis Menŝikov.

— Kun Dio! — respondis Petro.

Kaj, turninte la dorson al la bordo, sur kiu, pene moviĝante en sablo, trenis sin la Berlina kaleŝo, Petro per atenta kaj morna rigardo komencis pririgardi laborantajn sur la fregato matrosojn, la vastan, larĝan lagon, rapide kurantajn nubojn. Post la fregatoj ekiris aro de boatoj sub tolaj kaj bastaj veloj, tie aŭdiĝis kantoj, iuj gajaj elkrioj, krakado de tamburo...

Sed malproksime foriri ili ne sukcesis.

Vento malfortiĝis antaŭ nokto, poste ŝanĝis la direkton. Apud la Turna insulo Petro ordonis reveni por noktumo en Povenecon. Soldatoj kaj matrosoj bruligadis sur la bordo lignofajrojn, drinkis ian rekrementovinon, rakontadis fabelojn. Petro, sola, neaŭdeble alsidiĝadis al homoj, pinĉante la lipharojn, fumante pipon, mienis severe. La homoj, rimarkinte la caron, eksilentadis, Petro iris pluen, kolere kaj amare komprenante, ke oni timas lin. Post li — nemalproksime — kiel ombro vagis Menŝikov, iam persvadadis iri dormi, poste ree malaperadis en mallumo.

Sur la fregato en la salono sidis Pamburg, Varlan kaj Crøys, trinkis nigran kafon el malgrandaj ŝtonaj tasoj, fumis pipojn, vigle babilis. Kiam Petro revenis, ili leviĝis, interŝanĝis rigardojn, komencis retroiri al la pordo.

— Kien? — demandis la caro.

— Ŝajne, tempas dormi, — respondis Kornelio Ivanoviĉ. —

Ni supozas, ke via cara moŝto...

— Mi mem elpelos, kiam deziros! — kriis Petro. — Mem! Mem!

Lia voĉo rompiĝis, li batis per la pugnego la tablon, ordonis foriraĉi al diablo kaj longe sidis sola, sensence rigardante al flamo de kandelo kaj fiksaŭskultante knaradon de la fregato ĉe la albordiĝejo...

Kaj matene sur la pobkastelo li estis morne trankvila, rigardis malproksimen, enspiradis per la tuta brusto malvarman kaj humidan aeron de Onego kaj silentis, koncentrite ion pripensante.

Kiam la ŝipoj iris sur Sviro, Petro ofte ordonadis halti, eliradis sur la bordon, per grandaj paŝoj iradis en ĉebordaj arbaroj, vizitadis vilaĝetojn, parolis kun kampuloj. Plej multan tempon li pasigis en kverkaj arbaretoj — kun Ievlev kaj ŝipmajstroj Ivano Kononoviĉ kaj Koĉnev. Li mem mezuradis trunkojn, kalkuladis arbojn, pripensadis rimedojn, per kiuj oni gardu la porŝipajn altarbarojn kontraŭ ŝteluloj-forhakantoj. Revenante en boato al la fregato, li diris al Silvestro Petroviĉ:

— Mi ordonos por ĉiuj kvin verstoj pendumilojn starigi, tiam, mi opinias, ili pensos, antaŭ ol preni hakilon. Kaj la ŝtelistojn strangolitajn oni ne demetu, ĝis kornikoj disbekos ĉi kadavraĵon. Ili balanciĝos por timo...

Ievlev kun la ŝipmajstroj silentis. Blovis aŭtuna vento, pelis grizan ondon sur Sviro. Bruis senfinaj, en flaviĝanta foliaro, densaj arbaroj. Kampulo en kruda kanabtola ĉemizo, kalva, en bastoŝuoj, staris sur la bordo, mire rigardis al la cara ŝiparo — al la ŝipoj, boatoj, barkoj...

Sur la flagŝipa fregato oni pafis per la prua kanono — iri pluen. Petro foriris en sian kajuton, Ivano Kononoviĉ suspiris, diris al Ievlev nelaŭte:

— Kial do, kara Silvestro Petroviĉ, ni ĉiam per pendumiloj timigas? Nu, hakis kampulo pro nescio kverkon, sed kverko estas kverko, dum homo ja estas Dia animo? Ho Dio, kiom ni pendumos, kiom hakos kaj torturos...

Rivera vento eligis el liaj okuloj maljunulan larmon, li formetis ĝin per la fingro, miris:

— Jen, por kvin verstoj pendumilon. Ho, multe...

Silvestro Petroviĉ silentis: li ellernis nun silenti por longe, persiste, morne kaj trankvile...

Ĉapitro naŭa

Montru per faroj, ke vi estas ruso.
Suvorov[141]

Spiriton tiun putran vi ekstermu, Di',
De senenhava, sklava, blinda imitado...
Gribojedov[142]

1. Oreŝko

En monato septembro la armeoj de Petro, Ŝeremetev kaj Repnin komencis koncentriĝi sur kalkoŝtonaj bordoj de Nazjo — mallonga rivereto, enfluanta en la Ladogan lagon. La trupoj alvenadis malrapide, malgraŭ tio, ke ili faradis dum tagnokto tridekverstajn pasojn. Vojoj, kotigitaj de aŭtunaj pluvoj, estis malfacile traireblaj, la homoj laciĝis, kanonoj fiksiĝadis en koto.

Finfine estis kunvokita milita konsilio, post kiu la trupoj

---

141 Aleksandro Suvorov (1729–1800) — elstara rusa militestro, fondinto de la rusa milita teorio, granda stratego kaj taktikisto. Dum sia vivo ne malvenkis en eĉ unu batalo. Li kreis progreseman sistemon de edukado de militistaro, laŭ kiu la homo estas la decida faktoro de venko, li strebis veki en soldatoj amon al la Patrujo kaj instrui ilin agi kuraĝe kaj iniciateme. Li estis aŭtoro de traktaĵo «Scienco venki», estas konataj multaj liaj aforismaj frazoj pri la milita arto (kiel la citita) *(trad.)*

142 Aleksandro Gribojedov (1795–1829) — rusa verkisto kaj diplomato, plej fama pro sia versa satira komedio «Malĝojo pro saĝo» (la titolo tradukeblas ankaŭ kiel «La malfeliĉo esti tro sprita»), kiu ne perdis sian aktualecon kaj ĝis nun estas ofte ludata en teatroj kaj instruata en lernejoj; multaj aforismaj frazoj el tiu teatraĵo fakte proverbiĝis. Li estis murdita en Teherano (Persio) en la rusia ambasadejo fare de ribelintaj religiaj fanatikuloj *(trad.)*

faris rapidan pason al fortreso Noteburgo.

Sub malalte naĝantaj malhelaj nuboj oblikvaj radioj de punca antaŭvespera suno prilumis akrapintajn plumbajn tegmentojn de fortresaj konstruaĵoj, grizajn naŭklaftajn murojn kun dentoj, turojn ĉe la anguloj de la fortreso, la malvarmajn akvojn de Nevo.

Soldatoj, fosante tranĉeojn kaj redutojn, altrenante kanonojn, alportante kuglegojn, malgaje interparoladis:

— Kiaj turoj, vidu. Je dek du klaftoj altaj — ne malpli.

— Por ili el tie ni ĉiuj videblas kiel sur la manplato...

— Kiam ili komencos per peĉo priverŝi — ni gratos nin...

— Kaj la ŝtono estas firma! Novigis ili sian fortikaĵon. Ili nin, certe, regalos...

— Unu vorto — Nukseto[143]! Provu, dismordu!

— Ĝemos ni ĉi tie...

— Kaj kiel ĝin, diablon, preni? Ni ŝajne eĉ tiajn sturmajn ŝtuparojn ne havas — tiom longajn...

En la tendo de Petro same estis malgaje: ĉasistoj el preobraĵenskanoj skoltis, ke la dekstra bordo de Nevo estas tre fortikigita, trafi tien flanke de la lago estas nepenseble — oni dronos en marĉoj kaj pereos tute. Iĝis sciate ankaŭ, ke en la fortreso estas sufiĉe da provianto por longa sieĝo, ke tie estas multe da bone trejnitaj artileriistoj, sufiĉe da pulvo, kuglegoj, muskedoj, fusiloj kaj da ĉia cetera milita rezervo. Pri la estro

143 La rusa nomo Oreŝko (Орешек) signifas «nukseto», kaj figurasence «malmolaĵo». La fortreso estis fondita en 1323 de novgorodanoj, de 1612 ĝis 1702 apartenis al Svedio sub nomo Nöteborg *(trad.)*

de Noteburgo oni sciis, ke li estas forte kolera kontraŭ la rusoj, kuraĝa, ĵuris la flagon ne mallevi ĝislaste kaj pri tio skribis al reĝo Karolo XII...

Petro aŭskultis la skoltojn, kunpreminte la manplatojn per la genuoj, klininte la kapon. General-feldmarŝalo Boriso Petroviĉ Ŝeremetev, sen peruko, kun tuberplena kalva kapo, en varma, subŝtofita per pelto kamizolo, estis distrita, aŭskultis la ĉasistojn ne tro atente, turnadis sur la fingro multekostan ringon kun brilianto. Princo Repnin, rondvizaĝa, ruĝvanga, estis manĝanta per ligna kulero acidlakton, apetite almanĝadis biskoton.

Kiam la preobraĵenskanoj, ricevinte po dek kopekoj pro la sciigoj, foriris, Petro leviĝis de la benko, demandis Ŝeremetev-on:

— Ĉu malbone, Boriso Petroviĉ? Eble, ne disronĝos ni ĉi Nukseton?

La feldmarŝalo ekrigardis al Petro per la ŝvelaj okuloj, pensis iom, poste respondis trankvile, tute certe:

— Kial ne disronĝos, Siro? Ni sukcesos.

Petro kolere rememorigis:

— Vi ankaŭ ĉe Narvo minacis sukcesi, tamen grandegan konfuzon ni ricevis...

Boriso Petroviĉ ne deŝirante la okulojn rigardis al Petro.

— Kial vi gapas?

Ŝeremetev ree komencis turni la fingroringon. Malgaja rideto tuŝis lian grandan buŝon, li suspiris, balancis la kapon.

— Diru! — ordonis Petro.

— Kaj mi diros! — respondis Ŝeremetev severe. — Kial ne diri? Mi al vi, Siro, ĉiam ĉion diras, ne kaŝas...

Li silentis iom, koncentrante pensojn, poste ekparolis per sia raŭketa, agrabla, milda voĉo:

— Vi, Siro, bonvolis al mi Narvon rememorigi. Do, mi memoras. Amara estis la tago, pli amaran mi en mia vivo ne spertis. Kaj malgloron tiun mi sur la mortolito rememoros. Sed ankoraŭ mi memoras kaj memoros, kiel en la konsilio kaj antaŭ viaj caraj okuloj kaj antaŭ aliaj generaloj mi, kontraŭe al la perfidulo, serpento, spiono duko de Croy, mian dispozicion deklaris: bloki la urbon per malgranda parto de la armeo, kaj kun la tuta pli granda armeo iri kontraŭ frato via reĝo Karolo kaj fari al li batalon, en kiu ĉiuj niaj trupoj kuniĝus. Sed mia dispozicio, Siro, ne estis aprobita, vi min bonvolis al la nazo frapi kaj diri: «Mensogas vi hodiaŭ, Boriso Petroviĉ, al la tiom sperta en militarto kavaliro duko kontraŭas». Kaj nun ankaŭ vi mem, Siro, scias, kiu pravis — ĉu mi aŭ la brava kavaliro de Croy. Do ne riproĉu min pro tio, en kio ne estas mia kulpo... Kaj nun ni ĉi tie feliĉe estas sen spionoj kaj perfiduloj, vi, kaj mi, kaj Nikito Ivanoviĉ princo Repnin. Kaj ne senhonorigos ni la nomon rusan, reprenos nian antikvan Oreŝkon sub vian regadon, kiam necesos — eĉ la vivon ne domaĝos... Ĉu estos malfacile? Ni laboros, ni nun ne devas kutimiĝi al laboro, ni estas viaj lernintoj, kaj viaj manoj estas en kaloj kaj vi mem en Rusujo estas la unua laborulo... Ĉu mi ĝuste diras, Nikito Ivanoviĉ?

Repnin respondis elmalproksime:

— Ĝuste, sinjoro general-feldmarŝalo, tiel, vere...

Petro elprenis el la poŝo grandan ruĝan fulardon, laŭte,

trumpete mungis sin, viŝis la vizaĝon. Kaj kiam kunvenis la konsilio kaj la generaloj, koloneloj, kapitanoj eksidis sur benkojn, Petro estis firma, trankvila kaj parolis kun sia ordinara malmildeco:

— La svedon ni komencis dank' al Dio bati. Batis ĉi orgojlajn armeojn en Liflando nia plej inda sinjoro feldmarŝalo Ŝeremetev. La frato de la estro de la fortreso Noteburgo, Schlippenbach, de nia rusia armilaro fuĝis al Sangico — dudek verstojn for de la batalo, forgesinte ĉion. La sama Schlippenbach de Hummelshof al Pernovo fuĝis. Mi tial pri tio ĉi nun rememorigas, ke ni staras sub la muroj de la fortreso Noteburgo kaj nepre devas ĉi fortreson preni kaj Nevon per tio en ties Ladoga buŝo purigi. Kiu havas iajn opiniojn pri la afero?

Opinioj estis multaj.

Petro aŭskultis atente, interŝanĝadis rigardojn kun Ŝeremetev, Repnin, Ievlev, kapjesadis. La homoj parolis racie, tio estis batalspertaj, multe militintaj oficiroj.

La konsilio finiĝis longe post la noktomezo. Petro kun pipo eliris el la tendo, fiksaŭskultis la kvietiĝintan, ekdormintan tendaron. Poste prononcis nelaŭte:

— Ĉi viroj per fideleco kaj meritoj estas eternaj en Rusio monumentoj!

— Kiuj? — vigle, el aŭtuna malvarma mallumo, demandis Menŝikov.

— Ja certe ne vi, kara Saĉjo! — kun subrido respondis Petro. — Kia el vi estas monumento?

Aleksandro Daniloviĉ ofendiĝis, foriris en tendon. Petro

karese vokis lin, ankoraŭ fumis, ekiris dormi.

2. Sub la muroj de Noteburgo

La aŭtuno okazis frua, severa, estis oftaj malvarmaj pluvoj kun malseka neĝo, de Ladogo fajfadis trapenetra vento.

Homoj frostiĝadis, malsekiĝadis, malsanadis, mortadis. Mortintojn oni apenaŭ sukcesadis enterigi, sur la kruta Ladoga bordo rapide kreskis tombejo...

Super bivakoj bruadis per flugiloj, makabre grakante, kornikoj, nokte en arbaroj hurladis luparoj.

Silvestro Petroviĉ kun du mil matrosoj kaj laboruloj laboris ĉe Ladogo, ekipadis barkojn, kiuj devis detranĉi eliron de la svedoj al la maro. Por tio arbohakistoj trahakis de la lago al Nevo zonon, laŭ kiu oni trene movadis batalŝipojn. Grandegaj novaj, fortikaj barkoj sur Ladogo estis ekipataj por batalo, ĉarpentistoj metadis tabulajn podiojn sur pruo kaj pobo de ĉiu ŝipo, starigadis ŝildojn por pafantoj, armilistoj kaj kanonistoj skribadis per gudro sur la podioj numerojn de alveturigitaj kanonoj. Batalpretaj ŝipoj, provizitaj ankoraŭ per sturmaj ŝtuparoj, estis eltrenataj per vinĉoj sur la bordon, poste homoj kaj ĉevaloj enjungiĝadis en kanabajn rimenojn kaj trenadis la barkojn al Nevo. Laboro iris tage kaj nokte, Petro Aleksejeviĉ ne forlasadis la trahakitan zonon — mem submetadis rulilojn sub barkojn, mem observadis transportadon de kanonoj, mem rigardis armilaron kaj pulvajn rezervojn.

Tuj kiam Silvestro Petroviĉ komencis surakvigi siajn ŝipojn en Nevo, la svedoj elskoltis la rusojn kaj sub ŝirmo de densa

aŭtuna mallumo sendis el la fortreso kelkajn boatojn, armitajn per kanonoj, por pafi per mitrajlo. Kun ŝriko flugis arda fero, fojfoje aŭdiĝadis krio, ĝemo — pereinta soldato, matroso aŭ laborulo faladis en akvon. En mallumo tute proksime interparoladis svedoj, aŭdeblis plaŭdado de remiloj, svedaj komandaj vortoj.

Menŝikov kaŝe altrenis al la bordo de Nevo kelkajn kanonojn, la plej spertaj kanonistoj longe direktadis la tubojn, poste pafis per kuglegoj.

La svedoj ekbruis, iu unu ŝrikis per alta, strida voĉo.

— Jen kia! — kun malica ĝojo diris Aleksandro Daniloviĉ. — Ne plaĉas al li... He, ankoraŭ, knaboj, kukon al ili, diabloj!

La svedoj foriris.

En la sama nokto kaŝe al Silvestro Petroviĉ per neiritaj marĉaj padoj venis tri Ladogaj fiŝistoj. Ievlev akceptis la venintojn en sia tendo, fiksrigardis iliajn vizaĝojn, kovritajn de barboj, demandis, kiuj homoj ili estas.

— Ni estas homoj rusaj, — diris tiu, kiu estis pli aĝa, — sed ni sidas dum ioma tempo sub la svedo. En tio ni ne kulpas — kaj patroj niaj sidis kaj avoj. Nun ni aŭdis ion, — nia vilaĝo estas malgranda, kvar dek tri kortojn, la komunumo kunvenis, ordonis iri riverenci laŭ la malnova moro...

La fiŝisto tuŝis per la mano la terplankon de la tendo, malfleksiĝis, rekte kaj akre ekrigardis en la okulojn de la subadmiralo de la rusa milita floto.

— Oreŝkon vi atakos?

— Atakos! — firme respondis Ievlev.

— Bona afero. Ĉu la akvon ĉi-tiean vi konas?

— Ekkonos kun tempo.

— Kaj ni jam nun konas. Kaj la riveron Nevon ni konas laŭ tuta ĝia iro. Eble, tio estos utila. Ankoraŭ ni konas la fortreseton Nienŝancon. Ni iradas tien akve, preskaŭ ĝis la golfo, por komercaj aferoj. Vilaĝeton Ustj-Oĥton ni konas, urbeton komercan, nomatan Nieno. Ankaŭ rivereton Ohajoki, Ĉernavkon, bienojn Kiskina kaj Wehary, Eikie kaj Macura, ankoraŭ la Picean kaj Betulan insulojn[144]...

— Atendu, patro, — petis Ievlev. — Eksidu, kaj ni detale konversacios. Kia do estas via nomo?

La nomo de la maljuna fiŝisto estis Onufrio filo de Petro Ĥudolejev. La du aliaj nomis sin Stefano kaj Simono. Sen ceremonioj ili eksidis sur bastomatojn, akceptis kruĉetojn kun varmega miela sbiteno. Poste en la tendon venis Rjabov — same eksidis por aŭskulti. Venis ankaŭ Menŝikov. La fiŝistoj detale rakontis necesajn aferojn — pri sveda defendo de la mara buŝo de Nevo, pri tio, kia homo estas sveda majoro Konau, kaj la fortresa komandanto Johan, kaj konsiliano Frisius, kaj kiaj estas kanonoj tie, kaj kiom da soldatoj, kanonistoj, oficiroj. Laŭ vortoj de maljuna Ĥudolejev rezultis, ke majoro Konau estas la ĉefa estro de la fortreso Nienŝanco, granda ŝatanto de ĉasado, kaj kiel ĉaspelantojn tenas multajn rusajn kampulojn, tiuj kampuloj ĉiujn svedajn aferojn scias kaj nemalgrandan utilon povas doni al la rusa flanko.

144 Rivero Ohajoki — nun en la rusa nomiĝas Oĥto (Охта), de finna vorto «ohto» — urso. Ustj-Oĥto — en la rusa signifas «la buŝo de Oĥto». Nieno (svede Nyen) — urbo ĉe kuniĝo de Oĥto kaj Nevo. La Picea kaj Betula insuloj en la finna nomiĝis Koivusaari kaj Kuusisaari. Ĉio ĉi nun troviĝas en Sankt-Peterburgo. *(trad.)*

Ievlev kapjesis:

— Tio estas saĝa. Serĉu ilin, Onufrio Petroviĉ.

Ankoraŭ Ĥudolejev rakontis, ke en Nieno en mallibero suferas du rusoj, iliaj nomoj estas nekonataj, unu — cara servanto — kvazaŭ iris mare al sia lando, sed estis interkaptita de svedaj militaj maristoj, la alia estas servosoldato de la unua, antaŭ du semajnoj penis fuĝi, sed malsukcese — kaptis lin la svedoj...

— Necesas liberigi! — diris Menŝikov.

— Sen oro tio ne fareblas, — suspiris Ĥudolejev. — Niaj knaboj deziris, sed, vidu, la monujo estas malplena. Kaj la svedoj pri oro estas avidaj...

Aleksandro Daniloviĉ fosis en la monujo, elŝutis sur la polmon talerojn, elektis tri — pli malbonajn aspekte, pli trivitajn — kaj, donante al Ĥudolejev, promesis:

— Se vi ŝtelos la ĉervoncojn — mi pendumos! Mia juĝo estas rapida kaj severa, ŝerci mi ne ŝatas, al la griza barbo ne rigardos...

La fiŝistoj ofendiĝis ĉiuj tri. La plej juna, Stefano, diris al la maljunulo:

— Iru li for kun la oro, oĉjo Onufrio. Per ĉi moneroj eĉ konversacion komenci ne eblas, sed li ankoraŭ minacas. Li reen prenu... Kie estas iu pli altranga, ĉu caro?

Menŝikov ekridis, frapis Ĥudolejev-on al la ŝultro, prononcis pacige:

— Lasu, oĉjo! Diru klare, kiom da mono necesas? Mi por afero ne avaras, mi ordon ŝatas, ĉu vi komprenis?

Ĉe mateniĝo, en malvarma, humida nebulo, Rjabov el post kabeto kune kun la tri fiŝistoj eliris sur boato fari mezurojn, por ke la floto, kiam ĝi iros al la dekstra bordo, ne fiksiĝu sur malprofundaĵoj. Onufrio Ĥudolejev subridadis:

— Ne kredas vi al ni, diabloj. Ni kiel diras, tiel ĝuste estas...

Ivano Sabateiĉ mezuradis unue per stango, poste per ŝnuro kun ŝtono. Stefano kaj Simono parkere antaŭ mezuro diradis la profundon. Ĉio koincidis ekzakte. Onufrio, diveninte laŭ manieroj en Rjabov mariston, demandis:

— Kaj vi de kie tia naskiĝis, oĉjo?

— Ĉedvinaj ni estas, de la Blanka maro...

— Jen... Ĉu tio estis vi, al kiuj la svedoj per granda floto venis — bruligi urbon vian? Ion oni babilis ĉi tie en Nieno.

Rjabov ŝultrolevis, suspiris:

— De kie do mi sciu?

Sveda kuglo klakis al la pobo de la boato, aliaj kiel kolera vespa svarmo kantis super la kapoj de la fiŝistoj. Onufrio Ĥudolejev kliniĝis, miris:

— Ĉu ili al ni pafas?

— Al ni, oĉjo. Milito, vidu! — kun subrido respondis Rjabov.

Matene en la tendo de Ievlev Rjabov rakontis pri la lokaj fiŝistoj, ke ili estas inĝeniaj kaj nenion mensogas — sian aferon konas. Eblas kredi al ĉi triopo plene.

La Ladogajn fiŝistojn Ĥudolejev-on kaj Stefanon kun Simono oni ellasis al la afero kun honoro. Silvestro Petroviĉ

diris al li bonajn adiaŭajn vortojn, donis po tranĉilo de blanka ŝtalo, kompason, po du paperaj folioj, por noti sur ili svedajn fortikaĵojn. Onufrio, adiaŭante, diris:

— Niaj fratoj, rusaj kampuloj, ĉi tie nemalmultas. Ili vivas plej malbone. Kvazaŭ ne homoj — Dia similaĵo, malpli bone ol brutoj. Vi, sinjoro subadmiralo, nun atendu — aŭdos vi niajn farojn...

Pro la laŭta konversacio vekiĝis Ivaĉjo, kiun Silvestro Petroviĉ prenis en sian tendon, akompanis per rigardo la forirantajn nekonatajn virojn, tiris sin dolĉe kaj rakontis:

— Kaj mi, paĉjo, estos tamburisto. Je Dio! Hieraŭ oĉjo Aleksandro Daniloviĉ al mi renkontiĝis. «Vi, diras, por kio vane caran panon manĝas? Ĉe ni tiel ne taŭgas. Servi necesas...»

Ievlev konfirmis:

— Vere, tiel estis: Menŝikov ordonis...

— Kaftanon, li ordonis, ke oni por mi faru...

— Granda scienco, — diris Rjabov. — Ne tuj lernebla. Kaj kie preni tamburon, mi pensas, senbezonaj ne estas...

— Tamburon ni trovos! — promesis Ivaĉjo kaj komencis piedvesti sin.

La tago ree pasis en laboroj: oni fortikigadis bateriojn, alveturigadis kuglegojn, altrenadis tra la trahakita zono lastajn barkojn. Petro kun Ŝeremetev, Repnin kaj Menŝikov sidis en malalta, haste konstruita branĉkabaneto, kunpreminte la pipon per la fortaj dentoj, pensis super la mapo de Noteburgo, planis, kie estu baterioj sur la dekstra bordo, kie starigi flosantan

ponton trans Nevon, de kie iru boatoj de ĉasistoj, kiam komenciĝos sturmo. Ili kalkuladis kanonojn, sendifektajn barkojn, kiom da soldatoj eblas hodiaŭ sendi al batalo.

— Da kanonoj ni havas nun okdek ok, — diris Ŝeremetev, — da soldatoj kun matrosoj pli ol dek du mil. Mi dispozicias — en la plej proksima tempo ni komencos bombardadon...

— Por ke oni helpon de la Balta maro al ili, Herodaj idoj, ne donu! — ronĝante la ungojn, diris Menŝikov. — Fortranĉi necesas plene...

Repnin aliris Petron, per la fingro montris sur la mapo, kie endas transiri nun Nevon, por preni la svedan reduton.

Nokte, en nigra mallumo ekrulis tamburoj. Soldatoj, ŝarginte la muskedojn, kaŝinte rezervajn ŝargojn sub la vangon, kure, premante unu la alian, iris al la akvo, leviĝadis sur tabulajn podiojn de barkoj, kunpremiĝadis dense. Malgaje, morne, stride hurlis aŭtuna vento. La barkoj balanciĝadis, knaradis, batiĝadis per la flankoj unu al la alia. Ĉe la bordo suboficiroj kaj leŭtenantoj intervokadis:

— Preta-a!

— Plena-a-a!

— Ĉiuj estas ĉi tie!

Silvestro Petroviĉ leviĝis sur la podion de sia barko, ordonis al tamburisto bati «ekiron». La tamburo tremis mallonge, kvindek grandegaj barkoj debordiĝis, vice ekiris transverse de la rivero. Tie, super la svedaj skansoj, minace bruis arbaro...

La boatoj kun obtuza susuranta sono batiĝadis al la malamika bordo, la soldatoj saltadis de la podioj en scirpejon,

en akvon, en ĉebordan ŝlimon. Maldekstre, el mallumo, aŭdiĝis laŭta voĉo de Petro:

— Vigle, bravuloj, vigle, ne postiĝu! Ĉanojn strecu! Pafu plotone...

La svedoj ankoraŭ plu silentis.

Silvestro Petroviĉ, forgesinte pri la malsana kruro, saltis en akvon, levis super la kapo pistolon, por ne malsekigi la kulason; apogiĝante sur la bastono, ekkuris al la bordo. Malantaŭe, grimpante sur klifeto, estis insultanta Ŝeremetev, Repnin kun peza sabro en la mano devancis Ievlev-on.

— Per bajoneto piku! — kriis Petro. — Nia Oreŝko, knaboj, nia! Post mi, rapide...

Ĉe ekbriloj de pafoj renkonten al Ievlev kvazaŭ kuris altaj nigraj pinoj, betuloj, barieroj de la svedaj skansoj, flamantaj tuboj de muskedoj. Menŝikov jam estis tie — hakadis per sabro. Soldatoj, ĝemante kaj insultante, estis batalantaj en foskavoj, en kiuj sidis la svedoj. Ievlev saltis tien, batis fortmuskolan svedan oficiron per la bastono al la kapo, falis, leviĝis, ekkuris pluen, serĉante malamikojn, sed ili ne plu estis.

Tamburoj laŭ ordono de Petro batis malalarmon, la batalo finiĝis, la dekstra bordo apartenis al la rusoj. Petro, starante sur holmeto, per la mano en ganto montris, kien meti kanonojn por pripafado de la fortreso. Jegoro Rezen kun li disputis, aliaj fremdlandaj artileriistoj konsentadis. Silvestro Petroviĉ aliris, apogiĝis al la ŝultro de Rezen, fiksaŭskultis. Petro subite kapjesis — konsentis kun Rezen.

— Saluton, Jegoro! — diris Ievlev.

— Saluton, — haste respondis Rezen.

Kaj forkuris al siaj kanonistoj.

Silvestro Petroviĉ viŝis la ŝvitan vizaĝon, ĉirkaŭrigardis: super Nevo, super ĝiaj plataj bordoj, super plumbaj konusaj tegmentoj de la fortreso, super pereintoj en la batalo kaj super la vivuloj estis leviĝanta matena malvarma purpura aŭroro...

3. Subleŭtenanto de la ŝipa floto

— Nu? Kio fariĝas? — demandis Petro, enirante en la tendon.

— Ja nenio fariĝas, — oscedante kaj gratante sin, respondis Menŝikov. — La dorso ial doloras post la hodiaŭa batalo. Mi en hasto ne rimarkis, sed al mi iu svedo, kokina ido, per bajoneto aŭ per kolbo fusila inter la skapolojn batis. Ĉu vi kredas aŭ ne kredas, *Min Her*, mi povas nek fleksiĝi, nek malfleksiĝi. Eble, la internaĵo estas kontuzita?

— Vi ne plendu, kara infano Saĉjo, — diris Petro. — Se al iu homo la internaĵo estas kontuzita, tiu plie silentas, sed vi babilas kiel pigo. Ne gravas, vi vivos sufiĉe, se ni vin ne pendumos... Ankoraŭ kio nova estas?

Menŝikov silentis, poste rememoris:

— Kaj ankoraŭ, *Min Her* Piter, niaj fiŝistoj Ladogaj, raportis mi antaŭ nelonge pri ili, kiuj subadmiralon Ievlev-on vizitis, venigis ja la rusajn kaptitojn. Elaĉetis de la svedoj. Oron ja mi donis, ĉu vi memoras?

Petro pri la oro preteraŭdis. Aleksandro Daniloviĉ tusetis, rakontis, ke la rusoj estis kondukitaj ĉi tien, en la tendaron, ili sidas en la tendo de Ievlev. Unu — nobelido Spafariev — estis

sendita trans la maron tra Arĥangelsko, sed malsukcesis, ĝuste antaŭ la sveda invado lin el tie Silvestro Petroviĉ turnis al la seka vojo. Kun ĉi nobelido estas servanto-kalmuko, nomata Luĉjo...

Estis hurlanta aŭtuna pluvtorento. Super la Ladoga lago, super la Nevaj brakoj, super la sieĝata fortreso Noteburgo, super la tuta grandega rusa tendaro ŝrikis vento. La kurteno de la cara tendo ŝvelis, gutoj faladis sur la tablon, sur mapojn kaj paperojn, fajraj langetoj de kandeloj etendiĝadis kaj fulgis. Estis malvarme, humide kaj malkomforte.

Petro, ĵetinte la mantelon sur la liton, ĝemante komencis demeti la kotkovritajn, pezajn altbotojn. Aleksandro Danilovič gratadis sin, suspiradis, plendadis, ke la doloro inter la skapoloj iĝas kun ĉiu minuto pli netolerebla, kaj ĉi tie eĉ banejo ne estas, por ŝvitbani sin bone.

— Ne gurdu vi pro Dio, Saĉjo! — kuŝiĝante sur la kampan, malmolan liton kaj kun ĝuo etendante la krurojn en ruĝaj trivitaj ĝis truoj ŝtrumpoj, petis Petro. — Kaj kia vi estas senekzempla homo: nu faris vi la aferon, ĉiuj tion vidis, heroe vi la svedon batis, rekompencita vi estos, vi mem scias, sed prenas troe. Ne estas al vi, hundo, kontuzita la internaĵo, kaj ne pensas vi tion, sed miajn fortojn vi elsuĉas...

— Male, kontuzita! — obstine diris Menŝikov.

— Mensogas vi, hundo! Kaj neniu svedo vin inter la skapolojn batis...

— Ne ja, batis!

Petro grincis per la dentoj.

Kuiristo Velten alportis pecon de malvarma bovaĵo,

biskotojn kaj kruĉon kun vino.

— Kaj brasiksupon? — kolere miris Menŝikov.

Velten ne respondis: li ne ŝatis babili troe.

Kia povas esti supo en tia vetero? Sur kio ĝin kuiri?

— Kiam ni militas, ni pri vetero ne parolas, — diris Menŝikov. — Sed kiam necesas kuiri bonan supon — vetero. Se bati vin, hundon, per bastonoj, vi trovus fajron...

Al Petro Velten alportis etan pecon da ŝatata de tiu Limburga viskoza, pikanta fromaĝo.

— Hieraŭ estis pli! — morne rimarkis Petro Aleksejeviĉ.

Velten silentis.

— Pli multe da fromaĝo estis! — ripetis Petro. — Ĉu vi aŭdas, Velten? Mi kiomfoje ordonadis ŝpari ĝin. Oni veturigas ĝin el trans la maro, ĝia prezo estas granda, kvazaŭ en botoj ĝi iras. Kiu manĝis?

La kuiristo en la germana respondis, ke hieraŭ en la tendo estis feldmarŝalo Ŝeremetev, scivolis gustumi, maĉis kaj kraĉis, kaj li, Velten, ne kuraĝis al sinjoro feldmarŝalo diri ion.

Petro silente formanĝis la fromaĝon kun biskoto, poste ordonis al Menŝikov venigi la nobelon Spafariev-on.

— Ĉu ne estas malfrue, Petro Aleksejeviĉ? Matene kanonado komenciĝos, ni ne satdormos...

— Aleksaĉjo! — minace prononcis Petro. — Ne perdigu pro Dio al mi paciencon. Mi vere la internaĵon kontuzos...

Dum Menŝikov estis iranta por nobelo Spafariev, Petro, rigardante al la kurteno de la tendo, kalkulis mense, kiom da

kuglegoj estos eluzitaj ĝis la fino de la sturmo. Rezultis multe. Li kuntiris la brovojn kaj kalkulis ree. Poste li komencis taksi en la menso la tempon, necesan por livero ĉi tien de trajno da pulvo kaj bruligaj tuboj. Li sentis dormemon, sed li sciis, ke ne ekdormos, kiel li ne dormis tutajn ĉi tiujn tagojn de la sieĝo de Noteburgo.

— Mi venigis! — per humida voĉo diris Menŝikov, enirante en la tendon kaj deĵetante la mantelon. — Engrimpu, sinjoro navigisto!

Petro, ne ekstarante, strabis per la brilantaj brunaj okuloj, rigardis, kiel diketa, roza, blonda, simila al suĉporkido junulo, strange movante la korpulentan korpon, peze enkuris en la tendon kaj, disĵetinte la manojn, malleviĝis sur unu genuon.

— Lerte! — eksidante al la tablo kaj alŝovante al si stanan teleron kun viando, eldiris Menŝikov. — Evidente, forte studis sciencojn sinjoro navigisto...

La caro plu rigardis silente.

La nobelo, trenante unu piedon, kiel tion faras Parizaj galantegaj kavaliroj, kaj larĝe dismetante la manojn same laŭ la Pariza modo, aliris pli proksime kaj por longe rigidiĝis en longa kaj malalta riverenco, tiom malalta, ke bukloj de lia grandega peruko preskaŭ tuŝis la malpuran tapiŝon sur la tero. Poste sur la korpo de Spafariev kvazaŭ kuris spasmo, li movis la dikajn krurojn en striktaj silkaj ŝtrumpoj, saltetis, skuis la ŝultrojn kaj, farinte sur la vizaĝo pupan kortuŝan rideton, alpremis la manojn al la koro.

Aleksandro Daniloviĉ, ne ĝisportinte al la buŝo la bovaĵon, rigidiĝis, mire rigardante al la nobelo. Petro estis

palpebrumanta. Aŭdeblis trans fajfado de aŭtuna malbonvetero, kiel parolas ĉe lignofajro gardantoj.

— La kaftano kie estis kudrita? — neatendite demandis Petro.

— Ĉu? — ektimis la nobelo.

— Kie la kaftano, mi demandas, estis kudrita?

— En urbo Parizo per arto de glora tiea tajloro — *monsieur* Giraud.

— Kiom estis pagite al tiu Giraud?

— En livroj, mia Siro, mi ne memoras, sed en stujveroj por ŝtofpeco, necesa por ĉi kaftano, estis pagite dudek naŭ stujveroj[145].

Menŝikov suspiris:

— Bona prezo! Kontraŭ tia mono ni kanonon aĉetas...

— Vi ja silentu! — kriis Petro. — Vi ja la ŝtatan trezoron ŝparas!

Aleksandro Daniloviĉ entiris la kapon en la ŝultrojn: li sciis, per kio minacas mencio de tia temo, kiel la ŝtata trezoro, por li.

— Por la puntoj, kiuj el la manikoj elstaras, kiom estis pagite?

— Ĉi puntoj estas Brabantaj, mia Siro. Por la puntoj kaj por la Venecia veluro por la kamizolo estis pagite dek ok kaj dudek tri stujveroj...

Kaj, svingante la manikojn, iom fleksante la korpon, li

145 Livro (france livre) — malnova monunuo de Francio. Stujvero (nederlande stuiver) — malnova nederlanda monero, unu dudekono de guldeno. *(trad.)*

malrapide turniĝis antaŭ la caro, por ke tiu vidu perfektan elegantecon de tuta lia Pariza tualeto.

— Ĉu la ŝuoj same en Parizo estis faritaj? — demandis la caro.

— Tie, mia Siro. De ĉi glora ŝuisto — *le bottier* la nomo estas Grégoire.

— Bonege! — per glata voĉo, tiel glata, ke Menŝikov tute ŝrumpis, diris Petro. — Evidente, ne vane vi trans la maro tiom da jaroj pasigis. Galantulo! Probable, ankaŭ pri ĉiuj novmanieraj dancoj instruita?

La nobelo dismovis la manojn kun senĝeneco kaj gracio, kiel li estis instruita de kavaliro Frais Desprès. Tiu gesto signifis modestan agnoskon de siaj elstaraj avantaĝoj.

Petro eksidis sur la lito, plenigis per tabako la pipon, enpensiĝis. La nobelo, starante antaŭ la caro en eleganta pozo, estis ridetanta per senmova, ellernita trans la maro, plej agrabla rideto: liaj lipoj estis kunmetitaj korforme, la dikan kruron en ŝuo kun buko kaj banto li elmetis antaŭen. Kaj estis tiel kontenta pri si, ke neniom rimarkis, kiel ne konformas lia persono al tiu ĉi ŝvelinta pro pluvoj tendo, al la ŝiritaj ŝtrumpoj de la caro, al malabunda manĝo, kiu estis metita sur la pina tablo.

— Tiaj, kiel vi, nomiĝas trans la maro — bonvivanto, — prononcis Petro. — Bonvivanto — en la nia estas nenifarulo. Ĉu tiel?

Spafariev gracie riverencis.

— Menueton ĉu vi konas? — subite demandis Petro.

— Dancojn ĉiujn, mia Siro, mi konas bonege: ceremoniajn, kiel polonezo, anglezo, alemando, kaj kontradancon, ankoraŭ la kolomban, kie amoro inter du kolomboj estas montrata...

— Kuafurojn, tio estas hararanĝojn virinajn, ĉu vi konas?

— Certe, mi konas! Nun en la urbo Parizo, Siro, damoj per harpingloj, fontanĝoj kaj kornetoj siajn hararojn ornamas...

— Haltu, atendu! — iomete dentomontrante kaj borante la nobelon per malamanta rigardo de siaj globaj okuloj, ordonis Petro. — En ĉi galantaj sciencoj vi multon ellernis. Sed sendis ni vin por naŭtikon studi. Ĉu vi memoras pri tio?

La nobelo momente griziĝis.

— Ĉu memoras?

Menŝikov suspiris, mallevis la okulojn: li sciis, kio nun estos, kaj malĝojiĝis, kiel ĉiam en atendo de paroksismo de furiozo ĉe Petro.

— Ĉu memoras? — kriis Petro.

— Mi memoras, — susuris la nobelo.

— Bone! Nu, kaj se vi memoras, tiam respondu: kiel rebrasi la ĉefmastajn topveljardojn laŭ la vento al alia antaŭvelhalso?

Menŝikov forturniĝis: ankaŭ tiun ĉi teruran, pereigan por nobelidoj demandon li same aŭdis jam ne unuafoje. Nun la stulta nobelo penos fari neeblan kaj pereos. Se li konfesus, ke ne scias, — estus pli bone. Sed la nobelo komencis elbuŝigi ordinarajn stultaĵojn:

— Rebrasi, Siro, la ĉefmastajn topveljardojn laŭ la vento por navigisto estas tasko nemalfacila. Ĉe tiu manovro...

Al Petro abrupte tikis la vango, la rigardo iĝis sovaĝa:

— Ne malfacile? Stultulo! — leviĝante je tuta sia grandega alto, ektondris li. — Hundo aĉa, kvin jarojn navigarton studis, sed tion ne komprenas, ke mian taskon solvi estas same nepenseble, kiel per kalkano al si dorson grati. Ajna matroso ĉi malnovan ŝercon konas, sed vi, galantulo, bonvivanto, alemando, tripon mi el vi elskuos, internaĵon kontuzos...

Petro batis lin per la pugno al la vizaĝo — li ekŝrikis. Petro levis ingon de peza sabro, batis svinge — Spafariev falaĉis sur la teron, ekrampis. Menŝikov el la angulo diris:

— Pli facile, Petro Aleksejeviĉ, vi lin mortigi povas, via mano estas peza. Malvarmigu la ofendiĝon, lipu vinon...

Kaj, glatumante la kubuton de Petro, ĵetante al li oblikvajn rigardojn, li verŝis al li vinon, donis. Petro ĵetis rigardon, ne trinkis. Spafariev, kaŝinte sin post bareloj kaj sakoj, estis ŝriketanta, viŝanta sangon de la vizaĝo per la punta maniko, plende tusanta. Ree iĝis aŭdeble, kiel pluvas, kiel fajfas super malvarma Ladogo vento. Apud la tendo estis insultantaj la caraj gardantoj, iun ne enlasante...

— Diru, ke ili enlasu! — ordonis Petro al Menŝikov.

Tute malseka, kovrita de voja koto, surkreskita de nigra vilo eniris bombardista serĝento Ŝĉepotev, diris, ke la trajno kun pulvo kaj kuglegoj por ĵetado estis liverita en ordo, sur la vojo en marĉegoj nur du ĉaroj kun ĉevaloj dronis, kaj ankoraŭ unu kampulo — ĉaristo — ĝismorte batiĝis...

— Nu, bravulo! — tuj gajiĝante, laŭdis Petro. — Mi ĝuste hodiaŭ pensis — antaŭ sabato vi ne atingos. Iru dormi, bombardisto! Iru...

La serĝento foriris, Petro pensis iom, poste demandis:

— Ĉu meditis vi iam, Spafariev, por kio Dio donis al vi la kapon? Ĉu vere nur por ĉi longan perukon sur ĝin surmeti?

La nobelido ne respondis.

Petro ordonis montri senprokraste la diplomojn, ricevitajn de la nobelo en Parizo. Spafariev, timante batojn kaj skoldon, etendis la paperojn el trans la kestoj kaj sakoj al Menŝikov. Tiu alŝovis al la caro kandelingon kun degelantaj sebaj kandeloj, Petro komencis legi laŭte pri tio, ke kavalira moŝto kaj sinjoro Spafariev estas dotita de la Providenco per elstaraj talentoj kaj kun Dia helpo diligente kaj sukcese finis kurson de sciencoj pri naŭtiko, ŝipkonstruado, artilerio, fortifikaĵ-konstruado, astronomio, matematiko kaj aliaj ceteraj artoj. Al tiu elstara kavaliro, estis dirite en la diplomo, tute eblas konfidi komandadon kiel de galero, tiel ankaŭ de granda mara ŝipo.

Finleginte, Petro demandis kun humileco en la voĉo:

— Kiom da oraj stujveroj pagis vi, sentaŭgulo, por ĉi diplomo pri vi?

Spafariev silentis, plorsingultante.

— Vi prefere respondu! — konsilis Menŝikov. — Veron respondu, alie estos pli malbone...

La nobelo falegis trans la kestoj sur la genuojn, plorĝemis el tie, etendante al la caro la dikajn manojn en fingroringoj:

— Indulgu, Siro. Mi veron diras, kiel en konfeso. Mi pri nenio estis instruita, anstataŭ mi mia servanto laŭ mia ordono lernis. Ĉi diplomo ne al mi estis donita, sed al mia servutulo Luĉjo. Ĉi servanto, havante elstarajn kapablojn, ĉion anstataŭ

mi faradis kaj per mia nomo nomiĝis en la kolegio, kaj ankaŭ en la ŝipkonstruejo. Li, Siro, en maro navigadon havis, kaj mi, akvon timinte, en Parizo dancojn kaj aliajn galantaĵojn...

— Ree, eble, vi mensogas? — interrompis Petro.

La nobelo, starante sur la genuoj, krucosignis sin.

— Voku la servanton! — ordonis Petro al Menŝikov.

Aleksandro Daniloviĉ eliris. Nemalproksime de la tendo estis insultantaj soldatoj, glitis en koto ĉevaloj, trenante kanonojn, — matene la pafilegoj devis bati al la fortreso de nova pozicio. Petro fiksaŭskultis la bruon, taksis, ĉu en ĝusta direkto ili veturas. Ili veturis kien necesis — al la kabeto.

Kiam Menŝikov venigis la servanton, Petro atente fiksrigardis lin per siaj fajrerantaj globaj okuloj, vokis aliri pli proksime, demandis abrupte:

— Luĉjo?

— Oni nomas min Luko, Siro.

— Ĉu estas vere, ke vi, servanto kaj servutulo de nobelo Spafariev, anstataŭ li la necesan kurson de naŭtiko kaj de aliaj artoj studis? Respondu veron. Ne timu...

— Parolu, Luĉjo, — ŝmacante per la disbatita nazo, konfirmis la nobelo. — Ne timu, via kulpo en tio ne estas...

La servanto staris antaŭ la caro en trankvila pozo de sperta maristo — iom dismetinte por stabileco la piedojn, kun la manoj en la poŝoj de mallonga, urtik-kolora drapa kaftano. Estis rimarkeble, ke li cerbumas, kiel konduti, kaj taksas kaj la caron kaj sian mizeran mastron, sed samtempe en Luĉjo ne eblis rimarki eĉ ombron de kaĵolo — simple li estis nestulta

homo, diskreta, tute ne deziranta embarasiĝi. Kaj Petro rigardis al li ne urĝante kaj ne timigante: la konduto de la servanto de Spafariev plaĉis al Petro — li scipovis tuj diveni inteligentajn homojn, — kaj Luĉjo ŝajnis al li homo kun kapo. Kaj ankaŭ la aspekto de la servanto — kruda pro vento, grandpometa, ĝisblue razita vizaĝo, blankaj, densaj, etaj dentoj, larĝaj ŝultroj, — ĉio sugestis fidon al tiu homo.

— Nu? — finfine diris la caro, trankvile kaj bonanime. — Ĉu vi longe pensos? Respondu — ĉu vi estas instruita aŭ ne instruita?

— Instruita, Siro, — per malalta, obtuzeta voĉo respondis la kalmuko.

— Ĉu per forto la nobelo vin sendis al lernado?

— Kial per forto? — kun mallonga kaj bona subrido respondis Luko. — Li, sinjoro mia, ne estas malbona, estus peko plendi. Al la amora afero havas inklinon, sed ke li batus — mi ne memoras. Ne, Siro, ne per forto. Por mi mem sciencoj estas interesaj...

La nobelo plende plorĝemis trans la kestoj. La kalmuko ĵetis al li straban, sed kompatan rigardon kaj mallevis la okulojn.

— Demandojn, kiujn mi faros al vi, ĉu vi respondos? — rapide demandis Petro.

— Kial, Siro, ne respondi. Se mi scias, do respondos, kaj se ne — pardonu...

Petro ordonis al Menŝikov purigi la tablon kaj dismetis antaŭ si Merkatorajn mapojn, desegnaĵon de ŝipo, cirkelon, siajn notojn pri nova ŝipa konstruado, foliojn kun bonaj proporcioj por galioto. Li faris ĉion ĉi senhaste kaj per rigardo

kvazaŭ estis elprovanta Luĉjon: ĉu li ektimos aŭ ne. Sed tiu neniom ektimis, kvankam lia vizaĝo estis streĉita, kaj la inteligentaj, atentaj okuloj brilis per akra scivolemo.

— Eksidu ĉi tie, kontraŭ mi!

La servanto eksidi tuj ne kuraĝis, ankoraŭ staris por deco.

— Mi diris, eksidu...

Luĉjo malbutonis la kaftanon ĉe la gorĝo, eksidis sur la randon mem de la benko. Petro enprofundiĝis en pririgardadon de la ŝipa desegnaĵo. Luĉjo kaptis momenton kaj rapide, kuraĝige, per unu okulo palpebrumis al Spafariev. Tiu nur flustre ĝemis responde.

— Kio estas tio? — demandis Petro, almontrinte per la fingro la desegnaĵon.

— Topmasta hisŝnuro! — respondis la kalmuko.

— Tio ĉi?

— Tio ĉi, Siro, estas ĉefbrammasto...

— Ĉu vi ajlon manĝaĉis? — malŝate flarante, demandis Petro. — Odoraĉas de vi...

— Ĝin, Siro! — modeste respondis Luĉjo. — Ĝi mankis al mi, dum mi ĉe la svedoj en malliberejo sidis. Du bulbetojn mi haketis, kaj kun biskoto, kaj kun akvo...

Petro sulkiĝis, komencis demandi plu, poste ordonis:

— Spiru flanken!

La servanto respondadis ĉiujn demandojn ekzakte, klare, ĉion komprenante, sed kun enuo en la voĉo. Poste li subite prononcis:

— Tion, Siro, je Dio, eĉ instruita pigo povus parkerigi. Se vi faras al mi veran ekzamenon — demandu pri afero. Por ŝipon komandi, necesas kapo, vi, homoj diras, mem estas vera maristo, por kio vi vian caran tempon por bagateloj malŝparas. Demandu serioze!

La caro kun longa mirego ekrigardis al la kalmuko kaj subridis, ekvidinte, ke li mem estas timigita de siaj vortoj.

— Nu-nu! — suspiris Petro. — Ne sen impertinenteco vi estas, navigisto!

— Pardonu, Siro, — konsentis Luĉjo. — Sed vere, se mi trafis sciencojn studi, tiam modestulon oni kun tripo vorus...

— Tio estas vero! — kuraĝiĝante, konfirmis el trans la kestoj kaj sakoj la nobelo. — En Parizo, Siro, se la veron...

— Vi silentu! — kriis Petro. — Bonvivanto, hundo!

Kaj li ree komencis demandi la kalmukon kaj, demandante, ekdisputis kun li, kie oni pli bone kaj lerte konstruas ŝipan kilon — ĉu en anglaj ŝipkonstruejoj aŭ en la nederlandaj. La caro flamiĝis kaj kolere globigis la okulojn, sed Luko estis tute trankvila kaj eĉ subridadis — tiom li estis certa pri sia praveco. Ankaŭ malsanojn de ŝipa ligno — tabakan nodon, urtikan nodon, kornan nodon — la kalmuko sciis, kaj kiel plekti kanonan meĉon, kaj kiel fari maristan nodon...

— Nu, fraĉjo, konsolis vi min! — diris Petro, laciĝinte demandi kaj disputi. — Multe konsolis. Bona maristo kun tempopaso estos vi por la rusa floto. Ĉu vi havas edzinon?

— Ne, Siro, ne havas...

— Ni vin edzigos. Kaj fianĉinon por vi mi trovos —

cigninon.

Li pensis iom, frotis per la raspaj polmoj la vizaĝon, snufis, kvazaŭ laca ĉevalo, kaj ordonis al Menŝikov skribi en sia cara nomo. Aleksandro Daniloviĉ ĉesis oscedi, koleriĝis: skribi li apenaŭ scipovis, forgesadis literojn en hasto, iam nur ŝajnigadis, ke skribas, — kalkulis je sia memoro, kaj poste ĉion preskaŭ laŭvorte rediradis al Jaguĵinskij aŭ iu alia, kiu estis forta pri skribado.

Petro diktis rapide, abrupte:

— Pro ĉi bonfaraj por sia patrujo meritoj servutulon de nobelo Spafariev kalmukon Luĉjon nomi ekde nun sinjoro Kalmukov Luko... kun patronomo... Ĉu vi skribis?

Menŝikov skribis nur «pro ĉi bonfaraj», sed kapjesis:

— Mi skribas, Siro...

Petro enpensiĝis por momento:

— Kun patronomo — Aleksandroviĉ!

Menŝikov miregis, ekrigardis al Petro.

— Skribu, skribu! — kriis tiu. — Estos por vi ĉi Kalmukov baptofilo, vi al li ankaŭ doton donos — kion bezonas homo por sin aranĝi: uniformon, spadon, oron en monujon, vi ĉe mi ne estas malriĉa, estas el kio... Plu skribu: al ĉi Kalmukov rango ekde nun estas donita subleŭtenanto, kaj servu li sur fregato «Sankta Spirito» en posteno de supera oficiro ĉi tie, en Ladogo, ĝis renversos ni la fortreson Noteburgon. Ĉu vi skribis?

— Mi skribas...

— Tro malrapide vi skribas...

— Kioman nokton mi ne dormis, Siro, pro tio, ke...

— Pro tio ke! Skribu plu: kaj nobelon Spafariev-on regalas ni...

Petro paŭzis, malmilde subridis kaj ekparolis dise:

— Regalas ni per rango — matroso ordinara kaj ordonas al li servi sen promocio, tio estas dumvive, sur tiu ŝipo, kie sian flagon tenos la flota oficiro sinjoro Kalmukov Luko Aleksandroviĉ...

La nobelo laŭte plorĝemis trans siaj kestoj. Petro strabis al li, diris edife:

— Jen, ploras! Antaŭe devus pensi...

— Mi — pensis! — kun malgajego prononcis la nobelido. — Mi, Siro, pensis, ke per miaj perfektaj manieroj kaj galanteco ĉe via kortego mi estos rimarkita. Okazas, ke iuj altaj favoratinoj per vizito honorigas landojn kaj urbojn, necesas por ili galantaj kavaliroj por pasigo de tempo... Kaj tiu ĝenerala komplezemo...

Petro ekridegis, eksvingis la manojn:

— Pri tio ĉi vi dum kvin jaroj lernis? Kvin jaroj? Kara Saĉjo, ĉu vi aŭdas, por kio nia mono iris? Ho Dio, ja se por favoratino galantulo necesos, ni de nia Preobraĵenska regimento soldaton... ajnan... ho Dio...

Li ne povis paroli pro rido, svingadis la manojn, skuadis la kapon. Finridinte, viŝinte larmojn per la polmo, li ordonis al Menŝikov:

— Verŝu por ni, Daniloviĉ, po kruĉeto da aniza vodko por mateno — al sinjoro flota subleŭtenanto kaj al mi. Hodiaŭ la

tutan tagon ni laboros, komencos kun Dio sturmi. Dume ni drinku por varmiĝo, kaj sinjoro ordinara matroso Spafariev dancos por ni, pri kio lin en la urbo Parizo oni instruis. Dancon alemandon, ĉu?

Ekstreme paliĝinte, la nobelo elŝoviĝis el post la kestoj, diris kun teruro:

— Indulgu, patro-caro!

— Kaj ĉu vi vian patrujon indulgis en Parizaj restoracioj, hunda ido? — kriis Petro. — Ĉu indulgis? Dancu, se estis ordonite!

Nemalproksime de la cara tendo, sur la kabeto, bojis kanonoj, kaj tiel, ke sur la tablo tintis la botelo kun aniza vodko, rampis sur la teron telero. La svedoj sen prokrasto respondis, kaj komenciĝis matena kanonado.

— Jen por vi muziko! — superante per la voĉo la bruon de la kanonoj, diris Petro. — Bona muziko! Tiun dancon alemandon la garnizono de la citadelo Noteburgo jam multajn tagojn dancas, dancu ankaŭ vi! Nu!

Nobelo Spafariev eliris antaŭen, staris iom ĉe la benko, kvazaŭ kolektante fortojn, poste elturnis la dikan kruron, fleksis la brakon ronde. Subleŭtenanto Kalmukov, sidante apud Petro, suspiris malgaje. Kanona pafado ĉiam pli kaj pli forte kaj laŭte tondris sur Nevo. La tendo tremegis, pulva odoro penetris ankaŭ ĉi tien, ie nemalproksime kun fajfo batiĝis kuglego. Spafariev komencis dancon alemandon — du etajn paŝojn, duonriverencon, ankoraŭ paŝeton. Sur liaj dikaj vangoj ruliĝis larmoj, kaj la lipoj, kunmetitaj korforme, tremis.

— Kian dancon vi dancas? — kriis Petro.

— Ĉi danco estas nomata — alemando!

— Do dancu pli gaje, kiel oni instruis vin, galantulojn, por favoratinoj...

Spafariev penis rideti, larĝe disĵetis la manojn kaj sidiĝis, kiel necesas en la dua figuro de la danco alemando.

— Sur ĉiu ŝipo necesas inter matrosoj havi amuziston, tio estas bufonon, — diris Petro al Kalmukov. — Kiam vi estos promociita ŝipestro, ne forgesu por tiu afero meti ĉi Parizan bonvivanton. Pro liaj galantaĵoj matrosoj krevos pro rido...

— Ne, Siro! — firme kaj trankvile respondis subite Kalmukov. — Mi sur mia ŝipo, se estos promociita, bufonon ne tenos. Kun tempo estos el sinjoro Spafariev matroso...

— Sensciulon oni eĉ al popo ne promocias! — leviĝante de la benko, diris Petro. — Bufono li estas, sed ne de mara afero laboranto...

Kalmukov ne disputis: la tendo subite pleniĝis per homoj — venis Ŝeremetev en maŝkiraso, Repnin, Ievlev, koloneloj, kapitanoj, leŭtenantoj. Silvestro Petroviĉ ekvidis Spafariev-on, flustre demandis lin:

— Kiel?

— Malbone, ho, malbone, — per tremantaj lipoj prononcis la nobelido. — Kiel matroso sen promocio...

Menŝikov donis al Petro la mantelon, la caro eliris unua, post li kun laŭta parolo ekiris ĉiuj ceteraj. Ievlev, forirante, konsolis:

— Se vi servos, vi promociiĝos! Ho, kara, diris mi al vi en Arĥangelsko...

Li svingis la manon, foriris atingi la caron. Senĉese, sonore, peze tondris kanonoj. Spafariev staris senmove, duonmalferminte la buŝon, skuiĝante pro ploro.

— Nu, ĉesu, sinjoro, ploregi, vi granda elkreskis, ne infano, tio estas iom hontinda, — korektante sur la nobelo la longan perukon kaj reĝustigante la kaftanon, diris Kalmukov. — Skoldis vin, karan, Petro Aleksejeviĉ, nenio fareblas, — do, estas tia sorto. Vi dancis sufiĉe, nun, vidu, ankaŭ servi necesas...

— Al la muzelo li min batis kiom kruele! — plendis la nobelo. — Eĉ lumon mi, Luĉjo, ne vidis...

— Ha-a, kara sinjoro, — subridis la subleŭtenanto, — unu fojon oni vin batis! Kaj kiel do mi servutulo estis? Vi — certe, ne batis, sed tamen patrino via ĉiutage min batadis! Kaj per bastonoj, kaj per la propra mano bonvolis puni, kaj bolakvon, okazis, verŝis, kaj per arda fajrostango tuŝis! Kaj jen nur unu fojon, kaj la Siro mem! Tio estas kvazaŭ kareso. Sufiĉas, sinjoro, malgaji. Ni iru sur la ŝipon. Vi laboros, matrosan kaĉon maĉos, biskoton maristan ronĝos per la dentoj, kaj iĝos pli gaje...

La nobelo respondis per malglata voĉo:

— Pafas ja oni tie, Luĉjo! Kuglegoj flugas... Povas okazi io. Ĉu?

— Ja estas milito, sinjoro! — edife eldiris Kalmukov. — Kia milito sen pafado? Kaj kuglegoj, certe, flugas, ne sen tio. Nu, kaj Luĉjo vi min, sinjoro, ne plu nomu. Ekde nun mi por vi estas sinjoro subleŭtenanto, sinjoro oficiro, aŭ ekstremokaze — Luko Aleksandroviĉ. Tiele. Se vi eraros — oni vipos vin

senkompate. Marista servo — ĝi estas severa. Se servi, tiam ne kartavi. Kaj se kartavi, tiam ne servi. Ĉu vi komprenis?

— Kiel ne kompreni, sinjoro subleŭtenanto Luko Aleksandroviĉ...

— Vidu — vi estas komprenema. Kaj jen ankoraŭ io, kara sinjoro! Vi antaŭ mi ne iru. Ni ne estas en Parizo. Hodiaŭ jam mi iros la unua, kaj vi post mi, ĉar mi estas oficiro, kaj vi — matroso...

Kaj flota subleŭtenanto Kalmukov eliris el la cara tendo en grizan mateniĝan krepuskon, en malalte rampantan nebulon, en kiu ekbriladis oranĝkoloraj fumaj pulvaj fajroj de pafoj kaj senĉese tondradis pezaj sieĝaj kanonoj de la rusa artilerio.

4. Disronĝita la Nukseto!

Ĉe mateniĝo sur ambaŭ bordoj de la rivero senĉese tondris kanonoj. Kuglegoj kun hurlo flugadis en la fortreson — detruadis krenelojn de la turoj, disŝiradis svedajn kanonistojn, bruligadis fortresajn konstruaĵojn. La rusaj artileriistoj, deĵetinte la kaftanojn, suprenfaldinte la manikojn, lerte laboris sian militan laboron, celadis skrupule, purigadis la tubojn, alportadis kuglegojn.

Petro kun pipo en la manoj, kunmetinte la manojn malantaŭ la dorso, pasumadis apud ardigitaj kanonaj tuboj, rigardis al fuzeoj — ĉu ili ne ekbrulis ĝis akcidento: du fojojn jam okazis malfeliĉoj — ŝargo estis elĵetita al kanonaj priservantoj. Difektitaj kanonoj estis anstataŭigataj per novaj, la malnovajn oni forruladis pli malproksimen — por refando.

La citadelo estis rebatanta furioze, Neva malvarma vento priblovadis la reĝan standardon kun leono. Estis kompreneble, ke la svedoj firme decidis ne kapitulaci, malgraŭ ĉiam kreskanta premo de la rusa armeo. Petro penseme diris al Ŝeremetev:

— Ne tiom ili estas kuraĝaj, Boriso Petroviĉ, sed nepre helpon atendas. Kaj ne alie, ol de la lago...

Ambaŭ fregatoj, «Sankta Spirito» kaj «Kuriero», senĉese krozis sur Ladogo, atendis svedan eskadron kun trupoj. Pamburg kaj Varlan rigardis per lornoj, vane serĉis renkonton kun la kontraŭulo; sur la lago ruliĝadis monotonaj ondoj, kaj vento fajfadis en ŝnuroj.

Nelonge antaŭ tagmezo subleŭtenanto Kalmukov rimarkis per lorno du jaĥtojn kaj skunon. Sur la fregatoj oni sonoris alarmon, meĉistoj kun brulantaj fuzeoj ekkuris al siaj kanonoj. Sed la svedaj ŝipoj ne akceptis batalon, rapide foriris kun favora vento.

En la sama tempo en Noteburgo ekbrulis granda incendio: ruĝa flamo subite elĵetiĝis apud la Flaga turo, poste leviĝis ankoraŭ du garboj de fajro kaj aŭdiĝis eksplodo de terura forto. Tuj kliniĝis kaj ekŝutiĝis la muro ĉe la Sonorila turo. Al la breĉo ekkuris svedoj — soldatoj, masonistoj, forĝistoj, — ektrenis trabajn fostojn kaj ferajn barajĵojn. Dum la kanonoj estis alĝustigantaj la pafadon, la svedoj fermis la breĉon malnete kaj komencis superŝuti ĝin per rezervitaj ŝtonoj. Poste sekvis ankoraŭ kelkaj eksplodoj, kaj la tutan citadelon kovris malrapide rampanta fulgo — odoraĉa kaj densa.

— Ĉu ne viktorio? — ronĝante la ungojn, demandis Petro. — Ĉu, sinjoro feldmarŝalo?

— Atendu, Siro! — malmilde rigardante al la fulgaj strioj, respondis la feldmarŝalo. — Por ĉio estas propra horo. Kaj facile ili ne cedos. Militi kontraŭ ili ne estas simple.

En krepusko ĉasistoj ekiris kapti malamikajn boatojn, kiuj staris sub la fortreso. Preobraĵenskano Kragov, kaj semenovskano Mordvinov, Jegorĉjo Pustovojtov kaj ankoraŭ dek du lertuloj sidiĝis en longan rapidan barkon, metis grandajn sakojn kun lano kaj, alirinte al la insulo de la alventa flanko, bruligis per pulvo unu sakon. Nigra, mordanta, odoraĉa fumo tuj forpelis svedojn de la remparo, la ĉasistoj ĵetiĝis al la boatoj, sed la boatoj evidentiĝis alforĝitaj per dikaj feraj ĉenoj. La svedoj, rekonsciiĝinte, komencis bati malsupren de la supro per mitrajlo. Jegorĉjo, Kragov, Mordvinov per hakiloj truadis la fundojn de la svedaj boatoj... El tiu atako ne revenis sep homoj.

Noteburgo brulegis.

Sed la flago kun leono plu flirtis.

— Vidu, ili neniel deziras foriri! — diris Rjabov al Ievlev. — Forte ili sidas, kuraĝaj diabloj...

— Sen ŝipoj ilin preni ne eblas! — respondis Silvestro Petroviĉ.

Kaj subridis:

— Ĉu vi memoras, kiel ili al ni sur Dvinon venis, latronoj? Probable, ne pensis tiam, ke ni ne nur ne enlasos ilin, sed eĉ por repreni nian propraĵon jen kien ĝisiros!

Fajroj de grandega incendio dum la tuta longa nokto reflektiĝadis en la nigra, glata akvo de Nevo, prilumadis tendojn kaj terkabanojn de la rusa armeo, barkojn, starantajn ĉe

la bordo, sturmajn eskalojn, metitajn sur ŝildojn de ŝipoj, kroĉilojn por ŝipatako, almetitajn al la ŝildoj. Soldatoj, destinitaj al la sturmo, portadis sur la barkojn sakojn kun kapra lano — bona defendo kontraŭ kugloj. Dum la tuta nokto la rusaj kanonoj senĉese detruadis la brulantan fortreson. Petro, senmove starante ĉe sia tendo, rigardis al la incendiejo, kunpremadis en la mano lornon, diris al Ŝeremetev kaj Repnin:

— Mensogas sinjoroj svedoj! Kio estas nia — tio estos nia. Nun estas videble — ne plu ripetiĝos Narvo. Ekde la mateno ni komencos fini ilian fortikaĵon, ĉu tiel, Boriso Petroviĉ?

La general-feldmarŝalo pensis, fiksrigardis la brulegantan Noteburgon, diris grave:

— Vere, Petro Aleksejeviĉ, ŝajne, ke estas tempo. Pli ol tridek kanonoj ĉe ni por refando estas destinitaj, ok mil kuglegoj ĝis hodiaŭ estis ĵetitaj, tri mil tripudaj bomboj, da pulvo, probable, kvin mil pudoj estis bruligitaj...

Dimanĉe la dek unuan de oktobro antaŭ mateniĝo Menŝikov raportis al la caro, ke de sinjorino Schlippenbach venis tamburisto-parlamentario kaj deziras vidi la feldmarŝalon...

— Ĉu de sinjorino? — miris Petro.

— Ŝajne de sinjorino...

— Voku ĉi tien! Kaj ne diru al li, kiu mi estas. Kapitano de bombarda roto de la Preobraĵenska regimento...

La tamburisto venis, riverencis, etendis leteron kun bela sigelo el ruĝa vakso. Petro malvolvis la paperon per la malpuraj manoj, Menŝikov lumis al li per peĉa torĉo. Ĉirkaŭe staris kanonistoj, la torĉo prilumis vergajn korbojn kun kuglegoj, tubon de kanono, razitajn, fulgitajn vizaĝojn de rusaj

artileriistoj.

La edzino de la komandanto de Noteburgo Schlippenbach en sia nomo kaj en nomo de ĉiuj ceteraj edzinoj de svedaj oficiroj petis la rusan feldmarŝalon — permesi al ili, kompatindaj virinoj, eliri el la fortreso, kie ne eblas esti pro granda fajro kaj fumo...

— Plumon kaj paperon! — ordonis Petro.

Dum oni kuris por plumo, inko kaj papero, Petro ordonis regali la svedan tamburiston per vino kaj almanĝeto. Menŝikov submetis la dorson, Petro skribis per grandaj kurbaj literoj, ke al la feldmarŝalo li, la kapitano, ne veturas, estante certa, ke sinjoro Ŝeremetev ne konsentos malĝojigi la svedajn damojn per disiĝo kun la edzoj; sed se ili bonvolos forlasi la fortreson, tiam ne alie, ol preninte kun si siajn karajn virojn...

Subskribis Petro tiel: kapitano bombardista Petro Miĥajlov.

La tamburisto foriris, Petro diris al Menŝikov trankvile:

— Ili kapitulacu, sed ne ruzu kun ni. Damoj! Sufiĉe ili sidis en nia Oreŝko. Kaj ne taŭgas geedzojn disigi en malfacilaj por ili tempoj. Mi por la miaj ne estas vicpatro, kaj por la svedoj ne estas patro laŭsanga...

Al la kanonistoj, starintaj apude, plaĉis la vortoj de Petro, ili ekparolis kune, interrompante unu la alian per raŭkiĝintaj voĉoj:

— Ne, amiko kara, tiel ne taŭgos!

— Dum ni de Njuĥĉo iris — kiom da propraj homoj ni enterigis.

— Kaj en Liflando!

— Ĉu ĉe Narvo ili nin kompatis? Vunditojn pikmortigadis...

Petro tra dentoj ordonis:

— Komencu!

Kaj foriris en la tendon.

Oficiro-artileriisto ekstaris pli alte, svingis la spadon, kriis per alta voĉo:

— Kanonojn al batalo preparu!

Kanonado rekomenciĝis.

Pro muĝado de kanonoj tremis la tero. Nun ĉiuj, de soldato ĝis general-feldmarŝalo, sciis, ke komenciĝas sturmo. Kuglegoj truadis ŝtonajn murojn, ree kaj ree ekbruladis incendioj en la fortreso, tie pro furiozanta flamo degelis plumbaj tegmentoj. Ankoraŭ ne mateniĝis, kiam en pinoj, kie atendis pretaj al sturmo matrosoj kaj soldatoj de gvardio, batis tamburoj. La homoj ekkuris al la barkoj, tiuj per remiloj rapide ekiris al la fortreso. Iri estis facile, la vento blovis al la dorsoj.

La svedoj ne tuj komprenis la malfeliĉon. Sur la antaŭa barko iris Menŝikov, sur alia — Golicin. Repnin-on kaj Ŝeremetev-on Petro lasis ĉe si — sur la bordo; de tie per lornoj ili rigardis, kiel la sturmantoj starigas al la muroj ŝtuparojn, kiel ili surkuras supren, kiel la svedoj, rekonsciiĝinte, ĵetas ilin de naŭklafta alto sur ŝtonojn, kiel ili verŝas al la sturmantoj bolakvon, disfanditan peĉon, plumbon...

Barkoj, boatoj, ŝipetoj surterigadis soldatojn, tiuj, ŝirmante sin per sakoj kun kapra lano, iris al la muro — sur korpoj de mortigitoj kaj ĵetitoj malsupren de svedaj lancistoj, kaj la ŝipoj revenadis por novaj kaj novaj helpotrupoj. La du fregatoj —

«Sankta Spirito» kaj «Kuriero» — same veturigadis soldatojn kaj matrosojn. Pamburg estis kontuzita en la komenco mem de la sturmo, surdiĝis kaj estis nenion komprenanta, subleŭtenanto Kalmukov kuŝigis lin en kajuto sur kusenojn, leviĝis sur la pobkastelon, kriis en ledan paroltubon:

— Staru sur siaj lokoj! Aŭskultu mian komandon! Ekde ĉi momento mi estas komandanto de la ŝipo! Se iu maristo, svedan pafadon ektiminte, sian militan laboron kaj devon forgesos — mi mortpafos lin sur la loko, kiel hundon...

Nobelo Spafariev, jam en matrosa jako, en trikita ĉapo, movante la piedojn, staris nemalproksime, ete krucosignadis sin. La subleŭtenanto kriis al li:

— He, matroso Spafariev! Al laboro! Tuj!

Tiu estis ĵetita al la kanono, kie estis ordonite al li alporti kuglegojn, la kanonestro en furiozo batis lin per boto, la nobelido ekturniĝis turbe. Kun ŝriko super la kapo de la subleŭtenanto traflugis garbo da mitrajlo, la fregato estis alligiĝanta ĉe la insulo, la tuta babordo estis pafanta per kanonoj, ŝirmante siajn homojn. Apude renversiĝis granda barko, en boaton batis kuglego. Kadavroj estis malrapide flosantaj sur Nevo.

Kiam leviĝis nevarmiganta ruĝa suno, boatoj kaj barkoj alveturigis al la fortikaĵo ĉasistojn kun grenadoj. Kun brulantaj meĉoj en la dentoj la ĉasistoj rapidege leviĝadis laŭ fleksiĝantaj ŝtuparoj, elkaptadis el la sakoj grenadojn, demordadis, ĵetadis sur la murojn. Ŝeremetev malrapide krucosignis sin, malalte riverencis al Petro, reĝustigis sur si la zonon, la sabron, ekiris al la rivero...

— Vi gardu vin mem! — kun retenita tenero diris Petro. — Tie estas varmege...

La general-feldmarŝalo iris senhaste, malvarme kaj trankvile rigardante antaŭen per siaj rondaj aglaj okuloj. Rjabov donis al li boaton. Li eksidis, la boato ĵetiĝis antaŭen. Svedoj ekvidis la brilantan armaĵon de Boriso Petroviĉ — komencis pafi al li, li sidis senmove, turnadis la ringon sur la fingro. La trupoj sur la insulo renkontis lin per admira, longa raŭka «hu ra», li ekiris al la sturma ŝtuparo, prenis ĝin per la manoj en funelaj gantoj, kiel junulo rapide leviĝis supren — en la ardon mem de la miksbatalo...

Kaj malsupre la alveturigitaj kanonoj estis batantaj al la riparita de la svedoj breĉo per rekta pafado: ŝutiĝadis ŝtono, faladis traboj kaj fostoj, defaladis feraj baraĵoj.

Petro de la kabo vidis, kiel svedoj fuĝis de la batalaj turoj, kiel Menŝikov, kiu jam antaŭlonge transiĝis sur la insulon, sen kaftano, en silka, kvazaŭ flamanta kolora ĉemizo, kun peza sabro en la mano — estis hakanta sur la muro. Iam kaj lin kaj la brilantan armaĵon de Ŝeremetev ŝirmadis fumo kaj fulgo, kaj tiam ŝajnis, ke ili ambaŭ pereis, sed alflugadis vento, kaj ree iĝadis videble, kiel batalas general-feldmarŝalo Ŝeremetev kaj bombardista leŭtenanto Menŝikov, kiel maldensiĝas ĉirkaŭ ili defendantoj de la citadelo kaj kiel ĉiam pli kaj pli multaj iĝas kaj sur turoj kaj sur muroj — rusaj soldatoj...

— Subadmiralo sinjoro Ievlev ekiris! — diris Petro, rigardante en la lornon. — Ĉu vi vidas, Nikito Ivanoviĉ?

Repnin, vundita en la komenco mem de la nuna sturmo per hazarda kuglo, kun peno prenis la lornon, ekrigardis: videblis, kiel Ievlev, lamante, en sia verda uniformo, kun alte levita

spado, kuras al la breĉo en la muro kaj kiel kuras post li lavango de matrosoj en mallongaj jakoj kaj trikitaj ĉapoj sur unu orelo. Desupre al la maristoj oni pafis per mitrajlo, kelkaj homoj falis, sed la kapo de la sturmanta kolono jam eniĝis en la breĉon, ili batalis tie per tranĉiloj, sabroj, tranĉis kuntuŝiĝe, strangolis svedojn per nudaj manoj. Antaŭ Silvestro Petroviĉ estis la korto de la fortreso, sangokovritaj pavimŝtonoj, lasitaj svedaj armiloj, korpoj de mortigitoj...

Kaj sur la fortresa turo, super la pordego tiutempe aperis alta maljunulo kun flirtanta griza barbo. Li estis sola — ĝibeta, severa, osta, kun granda lorno en la mano. Longe, tre longe li rigardis en tiun lornon, kaj la ruĝa aŭtuna suno ludis sur lia kiraso, sur la ŝultroŝirmiloj, sur lamenoj de la helmo.

— Kiu estas? — demandis Petro.

— Amiko de nia feldmarŝalo! — subridis Repnin. — Frato de tiu Schlippenbach, kiun li ĉiam en Liflando peladis. Li ĉirkaŭrigardas. Rigardas — kaj ne kredas! Ne, sinjoro Schlippenbach, tio estas vero. Malbone al vi estas, tute malbone...

Mallevinte la lornon, la maljunulo ankoraŭ staris iom, poste svingis la longan brakon kaj tute ĝibetiĝis. Kaj sur la turo, kie ĵus flirtis la sveda flago kun leono, komencis malrapide leviĝi oblikve ŝirita blanka ĉifono...

— Viktorio! — mallaŭte diris Petro. — Finitaj estas la svedoj, Nikito Ivanoviĉ.

— Ĉi tie finitaj! — singarde respondis Repnin.

General-feldmarŝalo Ŝeremetev en tiu sama tempo, singarde paŝante per la kontuzita en la batalo kruro, estis malleviĝanta al

la boato. Li estis same trankvila, kiel tiam, kiam Rjabov veturigis lin sur la insulon, nur lia vizaĝo malheliĝis pro fulgo kaj en ĉiuj moviĝoj videblis laco. Post li en la boaton eksidis Menŝikov kaj Silvestro Petroviĉ. Ĉiuj silentis. Rjabov forte premis la remilojn, komencis ĉirkaŭiri la fregatojn kaj amasiĝintajn ĉi tie barkojn. Jam nemalproksime de sia bordo Boriso Petroviĉ diris kun subrido:

— Laciĝis mi la sabron svingi. Pro malkutimo ĉiuj muskoloj doloras. Aŭ eble, maljuneco venis, — kiel vi pensas, Silvestro Petroviĉ? Maltrankvile ni vivas...

Silvestro Petroviĉ respondis, plenigante la pipon:

— Ja ni jam ne estas infanoj, sinjoro general-feldmarŝalo...

— Ne infanoj, ne infanoj, sed mi ĉirkaŭ dek du homojn hakis! — diris Menŝikov. — Min, fratoj, per nudaj manoj oni ne povas preni. Unu, mi vidas, kuras, la okulojn elmetis, la spadaĉon jen kiel levis...

Ŝeremetev kun Ievlev interŝanĝis rigardojn, mallevis la okulojn.

La boato eniĝis en la malkrutan bordon.

Al la akvo, renkonten al la venintoj, elmetinte unu ŝultron antaŭen, svingante la manon, brilante, rapide iris Petro Aleksejeviĉ. Tamburistoj, viciĝinte, batis «malalarmon». Dekstre, iomete antaŭe, staris Ivaĉjo, la bastonetoj en liaj malgrandaj fortikaj manoj estis ekflugantaj facile, la brovoj estis kuntiritaj, la tuta aspekto diris: «Malfacila, sed grava estas nia laboro — tamburi!»

— Al sinjoroj venkintoj — vivu! — nelaŭte, sed kun forto kaj fiero prononcis Petro. — Vivu, amikoj miaj bonaj, filoj de

la patrujo veraj!

5. Poste

Ĉe la cara tendo staris ĉaretoj, al Petro Aleksejeviĉ venis komercistoj — el Moskvo, el Arĥangelsko, el Vologdo, el Jaroslavlo. Unu riĉulo — seka, faltoplena, kun maldika barbo, — riverencante al Menŝikov, parolis:

— Ni ĝuste scias, sinjoro, ke svedaj komercistoj kolektis monon, nemalgrandan, kun kuriero sendis tiun monon al reĝo Karolo, por ke li ne cedu sian fortreson, kiu gardas eliron al la maro — ĉu Balta, kiel ĝi nomiĝas. Al la svedaj negocistoj ni havas per kio respondi. Riverencu al Petro Aleksejeviĉ, diru, ke ni venis al lia moŝto, diru, ke ni falas al liaj piedoj — ne juĝu tro severe, akceptu, kolektis ni po iomete, — mi pensas, taŭgos por militiro. Se ne hodiaŭ, do morgaŭ venos horo, ankaŭ ni kun profito per niaj varoj komercos...

Petro, gaja, juna, kvazaŭ en la longe pasintaj tagoj de la konstruado de la Perejaslavla luda floto, brilante per la brunaj okuloj, estis rapide skribanta, starante ĉe alta, farita el nerabotitaj tabuloj pupitro, leteron al Apraksin, parolante samtempe kun Boriso Petroviĉ Ŝeremetev...

«Mi deklaras al via moŝto, ke kun helpo de venkodonanta Dio, ĉi fortreso, post kruela, ekstrema, malfacila kaj sanga sturmo, kapitulacis...»

— Do kiun, Petro Aleksejeviĉ? — demandis Ŝeremetev. — La afero ne estas ŝerca. La citadelo estas detruita forte, multajn laborojn necesas komenci, kaj la svedo ne prokrastos ĝin rekonkeri...

— Kiun, se ne Danilovîĉ-on! — trankvile respondis Petro. — Li estu komandanto. Kun li eblas esti certa, li faros ĉion kiel necesas...

— Danilovîĉ-on — bone! — konsentis Ŝeremetev kaj komencis legi preparitan liston pri riparaj laboroj en la ĵus rekonkerita fortreso. Petro, aŭskultante kaj kuntirante la brovojn, skribis alian leteron al Moskvo — al Romodanovskij, riproĉis la princon-cezaron, ke tro malrapide tiu sendas apotekistojn kaj kuracistojn, pro kio iuj pli frue ol la destinita tempo mortis per malbona morto. Ne finskribinte, li diris al Ŝeremetev:

— Feron do ni kie tiom multe, sinjoro feldmarŝalo, povas trovi? Ankaŭ sen fero estos bone — ni enbatos fostojn peĉitajn, ili tenas bone...

Kaj li komencis skribi novan paperon — al kiu kiajn dekoraciojn doni pro la preno de la fortreso Noteburgo. De malantaŭe aliris Aleksandro Danilovîĉ, tuŝis la ŝultron de la caro, diris:

— Al via moŝto, Siro...

Petro, ne finskribinte la ukazon, turniĝis, rigardis al la negocistoj kaj forkondukis ilin por konversacio. Tuj aŭdiĝis lia baso:

— Mono estas arterioj de milito, sen ili kion fari? Vigliĝos nun komerco, vi riĉiĝos, sinjoroj negocistoj, alie aferoj iros. Pensadis ni, cerbumadis — havi alian havenon, sed Dio ne donis. Do, la nian ni senprokraste ricevos. Pri tio ne dubu, tamen ricevos ni ja ne senpage. Kaj ni al vi riverencas — petas: helpu per faro...

Riĉulo, pala pro emocio, tute bluiĝis, aŭdinte la vorton «petas», liaj lipoj kurbiĝis, la barbo skuiĝis:

— Ja Siro, ho Dio, ja vi...

— Drapon bonan necesas por la armeo liveri, — parolis Petro, — sed sen trompo. Antaŭ nelonge negocisto Ĵilin liveris putraĵon, pro tio ni lin pendumos. Ĉu vi aŭdas: bonan drapon! Ankoraŭ ĉaroj necesas sur feraj radoj, multaj. Ledon planduman, jufton por botoj, butonojn kornajn — kiu faros? Vi pensu, morgaŭ matene ni konversacios sen hasto...

La negocistaro ĵetiĝis al la mano por kisi. Petro, ne rigardante al ili, ŝovadis sian grandegan manegon — en inkaj makuloj, en rusto, en pulva fulgo, manegon ne de aŭtokrato de la tuta Rusujo, kiu devas odori je benzoo, — manegon de laboranto, kampulo, soldato...

En la tendo bruis generaloj, fluis vino, komenciĝis granda batalo kontraŭ «Ivaĉjo Ebria». La negocistoj — malnovritanoj-membruligantoj[146] — anservice ekiris al la elirejo, por eviti pekon. Menŝikov kaptis unu el ili — la plej koleran aspekte, maldikan, elturmentitan per fastoj, — verŝis kalikon, ŝovis en la manon pecon da kuirita porkidaĵo:

— Drinku, oĉjo, je glorega nia Siro...

La negocisto por momento rigidiĝis, poste eltrinkis la tutan kalikon unuglute, almanĝis porkidaĵon, flustris:

---

146 Malnovritanoj-membruligantoj — anoj de radikalaj malnovritanaj sektoj (ĉefe en la Rusa Nordo), kiuj de la 17-a ĝis la 19-a jarcento praktikis amasan sinmortigon per fajro. Ili eskapis la persekuton de la ŝtato kaj de la oficiala eklezio, rigardante la membruligon ne kiel pekan sinmortigon, sed kiel «purigan martiriĝon» kaj solan manieron savi la animon en la «regno de Antikristo» *(trad.)*

— Ne mia peko, ne mia... Pardonu, Dio...

— Mensogas vi, oĉjo, ne trompos vi Dion! — timigis Menŝikov. — Brulos vi en peĉo pro tio, ke vi porkidaĵon manĝaĉis. Hodiaŭ kia estas tago?

En la caran tendon venis subleŭtenanto Kalmukov, trankvile, kun digno eksidis inter generaloj kaj koloneloj, komencis apetite manĝi grasan viandon. Petro ĵetis al li rigardon, demandis Menŝikov-on nelaŭte:

— Ĉu vi al via baptofilo, Daniloviĉ, oron por sinaranĝo donis, aŭ forgesis? Donu jam nun, poste pro klopodoj vi ree forgesos, ĉu ne?

Kaj li etendis la polmon.

Aleksandro Daniloviĉ malligis monujon, elŝutis sur la polmon de la caro manplenon da ormoneroj. Petro atendis ankoraŭ, ridante petis:

— Ĉu ne malmulte? Vi ne avaru, sinjoro leŭtenanto...

Kalmukov la monon akceptis trankvile, ligis en tukon, riverencis al la caro. Tiu brakumis lin je la ŝultro, komencis demandi flustre, kiel ĉio okazis sur la fregato. Luko Aleksandroviĉ laŭdis Pamburg-on — ke li, eĉ kontuzita grave, ne deziris forlasi la pobkastelon, — laŭdis la ŝipanaron, rapidecon de la ŝipo. La caro kapjesis, ree ekiris al sia pupitro — skribi. Ĉiam pli brue, pli gaje iĝadis en la tendo, plej multe bruis Menŝikov, rakontadis, kiel antaŭ nelonge generalo Cronhjort intencis doni helpon al la sieĝitoj kaj kio el tio rezultis. Oni lin interrompadis, li kriis ĉiam pli laŭte, ke kvazaŭ sen Menŝikov forirus la komandanto Eriko Schlippenbach, li — Menŝikov — tiun Erikon rimarkis kaj ne lasis al li fuĝi,

timigis, svinginte la spadon, apenaŭ ne trapikis, sed tremis la mano, alie estus la oldulaĉo en la transmondo. Ŝeremetev aŭskultis, suspirante; Nikito Ivanoviĉ Repnin aŭskultis ĝoje, kun brilantaj okuloj: li ŝatis mensogadon de Menŝikov, kiel ŝatis fabelojn, kantojn pri prodoj, ne pensante — ĉu ĝi estas vero aŭ elpensaĵo.

— Mensogu pli! — same aŭskultante Daniloviĉ-on kaj trarigardante poŝtaĵojn, diris Petro. — Eriko! Vi apud tiu Eriko eĉ proksime ne estis. Ni ja vidis...

Li formetis legitajn leterojn de ambasadoroj el diversaj ŝtatoj kaj komencis skribi al Vinius: «Vere estis multe dura ĉi nukso, tamen, dank' al Dio, ĝi estis feliĉe disronĝita...»

— «Mensogu»! — el malproksime ofendite diris Menŝikov. — Ĉu vi, sinjoro bombardisto, el ĉi tie ĉion povis vidi? Kaj la lornon vi, Siro, rompis, kiam en la Solovkia klostro al la kapo iun personon regalis. Ĉi lorno estas nun nefidinda, per ĝi ne ĉio videblas...

— Kio necesas, tio estas videbla! — respondis Petro. — Kaj viaj ruzaĵoj sen lorno estas tre rimarkeblaj. Kiel vi hieraŭ kun la negocistoj afablis... Iu persono...

Li turnis la kapon, ekridegis, vokis al si Silvestron Petroviĉ-on. Ievlev aliris kun peco da ŝinko, — ekde la komenco de la batalo li ankoraŭ nenion manĝis.

Petro demandis:

— Ĉu eliris la svedoj?

— Intencas. Multaj, granda ŝipestro, pro vundoj malfortiĝis, iuj pro malsato. Siajn mortintojn ili ne havas fortojn sepulti inde...

Petro kapjesis, enpensiĝis por momento, mordetante la pinton de la plumo, poste diris nelaŭte, kvazaŭ ĝeniĝante pro siaj vortoj:

— Helpon necesas al ili doni, por ke malsatantoj estu manĝigitaj, soifantoj estu trinkigitaj. Hieraŭ ne ordonis mi iliajn edzinojn ellasi — petis ilia parlamentario, — sed kiel ja fari?

Kaj, pensinte, kuntirinte la brovojn, li ripetis la hieraŭan frazon:

— Mi por la miaj ne estas vicpatro, Silvestro.

Ievlev silentis.

— Kun ĝentileco nun necesas ellasi la edzinojn, ja ili sufiĉe suferis. Por ke galanteco estu, alie ne decas...

Silvestro Petroviĉ riverencis.

— Iru, laboru! Al la inoj svedaj vinon ordonu doni Rejnlandan aŭ hungaran, ĝi estos pli malkara. Vi mem pensu, kiel fari, por ke estu kaj kun ĝentileco kaj ne tro dolĉe. Alie ili opinios sin tro gravaj. Kaj revenu ĉi tien tuj, ni ripozos iomete de la Marsaj laboroj. Ordonu vodkon al soldatoj kaj matrosoj elruli, ja ili meritas, ili festenu libere...

Ievlev eliris, malleviĝis laŭ malkruta bordo al la akvo mem. Ĉi tie, sidante sur faldebla seĝo, jam atendis la komandanto de Noteburgo Schlippenbach; brilante per malamantaj okuloj, li tenis la helmon sur la genuoj, tamburis sur la platoj per la fingroj. Ladoga vento estis movanta liajn grizajn kun verdeto harojn, disblovanta la longan barbon.

— Sinjoro Schlippenbach ne povas ekstari kaŭze de vundo

en la kruro, — diris sveda tradukisto. — Sinjoro Schlippenbach estas devigita aŭskulti punktojn de la kapitulaco sidante.

Sekretario Ŝafirov kaj leŭtenanto Ĵerlov komprenis, alportis por Ievlev benketon, ke li legu same sidante. Silvestro Petroviĉ malvolvis sub vento paperon, tusis, komencis legi kapitulacajn punktojn, skribitajn de Ŝeremetev kun korektoj de Petro:

— La tuta garnizono kun malsanuloj kaj vunditoj, kun ĉiuj apartenantaj al ĝi aĵoj forliberigita estos al Nienŝanco sur akvo aŭ sur seka vojo kun akompanantoj. Al la komandanto de Noteburgo, al ĉiuj oficiroj kaj soldatoj estas permesate eliri kun edzinoj kaj infanoj el tri breĉoj libere kaj sekure, kun levitaj standardoj, kun muziko, kun kvar feraj kanonoj, kun plena armilaro, kun necesa rezervo de pulvo kaj kun kugloj sub la vangoj...

Schlippenbach elaŭskultis tradukon, al li oni donis plumon, li subskribis la paperon super Ŝeremetev, lamante ekiris al boato. Rjabov de malantaŭe tuŝis la kubuton de Ievlev:

— Ĉu vi estas sana, sinjoro subadmiralo?

— Vivas ni pli-malpli, Ivano Sabateiĉ...

— Sed da homoj estis multe mortigite! — diris la piloto. — Ĝis ses cent. Oni fosas amastombejon... Ĉu doni al vi biskoton?

Li rompis duone grandegan sekalan biskoton kun elstarantaj aristoj, apetite mordis sian duonon. Ievlev same komencis maĉi, donante ordonojn, kiel veturigi al la svedoj en la fortreson provianton.

— Ankoraŭ nutri ilin, damnitajn! — diris Rjabov.

— Ni devas! — respondis Ievlev.

En la regimentoj sub pinoj ekbatis tamburoj — al vodko. Apud segitaj duone bareloj staris serĝentoj — vinon en ĉi tago oni ne avaris por ĉiuj. El la cara tendo aŭdiĝis gajaj krioj, sur kampeto antaŭ la cara standardo estis ludantaj kornistoj. Aleksandro Daniloviĉ en sia hela, flamkolora ĉemizo elsaltis pave antaŭen, trairis per lerta danco. Gvardianoj akompanis la bombardan leŭtenanton per aproba ridego, per gajaj ekkrioj:

— Bonege!

— Ĉi tiu — scipovas!

— Faru, Daniloviĉ!

— Bruligu, sinjoro leŭtenanto! Ŝiru!

Post Menŝikov — pala pro drinkita vino, kun rigidiĝinta rigardo kaj hirtaj haroj — aperis la negocisto-membruliganto, ekiris dance kun artifikoj, per bravaj paŝoj. Aleksandro Daniloviĉ ŝovis la fingrojn en la buŝon, ekfajfis kiel arbara koboldo, ekturniĝis antaŭ la negocisto, komencis allogi per fingroj, ŝriki per diversaj voĉoj. Post ili du glate, sur firmaj piedoj, kun rideto aperis Nikito Ivanoviĉ Repnin, sub la piedojn de la dancantoj ĵetiĝis dancistoj-gvardianoj, ekturniĝis turbe sub rapidaj sonoj de la kornoj:

Tara-bara-babiladis,
Grizaj lupoj eliradis,
Blankaj neĝoj elfaladis...

— Pli ofte, kornistoj! — petegis Menŝikov. — Pli ofte, amikoj!

La membruliganto, piedfrapante la lokon per la kaproledaj botetoj, ŝrikis:

— Konsolu, Danilovi̇ĉ! Ankoraŭ konsolu! Ĝis la morto mi ne forgesos! Konsolu, falko!

Kaj en la cara tendo oni kriis «vivu!» al feldmarŝalo Ŝeremetev, bombarda kapitano Petro Miĥajlov, Repnin, Pamburg, Varlan...

En krepusko Silvestro Petrovi̇ĉ ordonis ellasi la svedojn. En la fortreso obtuze ekbatis tamburoj, en la breĉo aperis standardisto en kiraso, post li iris Schlippenbach. Ĉiu soldato havis en la buŝo du kuglojn, portis fusilon, spadon, tornistron kun provizaĵoj. Da soldatoj kaj oficiroj eliris entute kvardek unu homo, post ili iris virinoj. Vunditojn ekportis sur brankardoj rusaj matrosoj.

— Ankoraŭ en gardoj estas ĉirkaŭ dek homoj! — prononcis Ŝeremetev. — La ceteraj estas mortigitaj. Ne eblas riproĉi — ili batalis bone...

Nokte Petro eksciis, ke generalo Cronhjort iras por helpo al la svedoj. Tuj en boato li kun Ŝeremetev kaj Silvestro Petrovi̇ĉ transnavigis Nevon kaj ordonis al la sveda majoro forigi la gardojn. La svedo ŝajnigis, ke li ne komprenas.

— Ligu lin! — ordonis Petro. — Tiam li komprenos!

La majoron oni ektrenis flanken, li kriis laŭte, stride, en la sveda al siaj gardistoj, ke tiuj ĵetu torĉojn en pulvejojn. Silvestro Petrovi̇ĉ batis svedan soldaton per la kapo al la ventro, kolonelo Chambers kaptis alian je la gorĝo. Sekretario Ŝafirov ŝovis la torĉojn en barelon kun akvo. En plena mallumo estiĝis tia silento, ke ĉiuj ekaŭdis susuradon de pluvo...

— Kanajloj! — anhelante, eldiris Petro. — Ili eksplodigus

la fortikaĵon...

Matene okazis solena eniro de la feldmarŝalo kun generaloj kaj armeo en la fortreson. Trifoje pafis ĉiuj kanonoj — kaj la rusaj kaj la prenitaj de la svedoj, — trifoje krakis salvoj el ĉiuj fusiloj kaj muskedoj. Post diservo Menŝikov deklaris en la cara nomo la novan titolon de Noteburgo. Ĉi fortreson estis ordonite nomi Ŝluselburgo[147] — kio signifas Ŝlosil-urbo, ĉar ekde nun estas malŝlosita pordego al la propraj originaj teroj.

Sub kantado de klarionoj kaj tambura batado feldmarŝalo Ŝeremetev leviĝis sur la okcidentan turon kaj, malalte riverencinte al la trupoj, pendigis la ŝlosilon de la fortreso sur feran hokon, enbatitan en ŝtonon...

Por nokto en la citadelo oni starigis gardojn, kaj dormi forveturis sur la bordon. Antaŭ ol eksidi en boaton, Ivaĉjo tiris la patron flanken, diris konfide al la orelo:

— Paĉjo, ĉi tie trans ŝotro restis ilia tamburo. Ja la mia estas truita, tute ĉifita...

— Do, prenu, vi meritis, — subridante respondis la piloto.

Ivaĉjo levis la svedan tamburon, ŝovis en la boaton sub la benkon, sur la bordo tuj ekkuris elprovi, pli malproksimen, al arbareto.

Dum la tuta nokto sur la bordoj de Nevo kaj en la citadelo brulis fajroj — grandaj kaj malgrandaj, sur ili bolis kaldronoj kun kuiraĵo. En la rusa armeo preskaŭ neniu dormis. Soldatoj, sidante sur arbostumpoj, sur kanonaj afustoj, sur hakitaj pinoj, rememoradis la batalon, montradis per la manoj, kiel kiu pikis

147 De germana Schlüsselburg; poste en la rusa tiu nomo transformiĝis al Ŝliselburgo (Шлиссельбург) *(trad.)*

per bajoneto, batis per kolbo, grimpis sur sturma ŝtuparo. Tiujn, kiuj estis en la ardo de la batalo, aŭskultis juna generacio, blondharaj knaboj. Ankoraŭ ne flarintaj pulvon, ili timigite interrigardadis, spertaj soldatoj rakontadis pli terure, ol estis en la realo, kvankam estis ja sufiĉe timinde...

En malfrua nokto Silvestro Petroviĉ kun Jegoro Pustovojtov, Rjabov, Rezen kaj Koĉnev ekiris sur boato en la fortreson — rigardi, kion en ĝi necesas fari. Rusaj fajroj per malstabila purpura brilo prilumadis forbrulintajn domojn de la garnizono, fandiĝintajn tegmentojn, amasojn de kuglegoj...

— Do, — diris Silvestro Petroviĉ, — ni kalkulu nunajn profitojn. Skribu, Rezen, liston — kion ni akiris.

Kaj li komencis dikti.

— Kanonoj gisitaj nombre cent sep. Mortiroj — unu. Haŭbizoj — sep...

Jegorĉjo el malproksime kriis:

— Sinjoro subadmiralo, rigardu...

— Kion rigardi do?

— Estas kion...

Ievlev aliris pli proksime, Jegorĉjo alte tenis torĉon. Fulganta flamo prilumis tubon de granda kanono, majstran gravuraĵon, malnovajn literojn...

— Nia kanono! — kaŝante emocion, diris Ievlev. — Gisaĵo estas antikva, ĉe caro Ivano Baziljeviĉ oni tiel faradis. Do, skribu, inĝeniero: kanono de rusa gisado, bona... Eble, iu Forĝisto super ĝi laboris...

Ili kalkulis kuglegojn — dek unu mil, pulvon — ducent

sepdek bareloj, spadojn — tricent, kvin mil mangrenadoj, plumbon, salpetron, peĉon, kirasojn, fusilojn pli ol mil. Poste ĉiuj kune pririgardis la turojn, donante al ili novajn rusajn nomojn: tiu ĉi estu Ŝeremeteva, tiu ĉi — Repnina, tiu ĉi — Golovina.

Ĉe mateniĝo, ĉirkaŭirinte la fortresajn murojn kaj kaŝitajn pasejojn, arsenalojn kaj pulvejojn, ili revenis en la tendaron. La mateno estis malvarma, de Ladogo blovis penetra vento, sur Nevo kuris blankaj ŝaŭmaj ondetoj. En la boato Koĉnev diris:

— Kaj sur la bordo pendumiloj staras...

Silvestro Petroviĉ fiksrigardis, ekvidis: sur la tendara placo, viciĝinte po batalionoj, staris senmove gvardianoj de la Preobraĵenska kaj Semenovska regimentoj, soldatoj de Romanovskij, Gordon, van Bockhoven.

Monotone, morne, rule estis krakantaj tamburoj, fajfis fluto.

— Kio estas tie? — demandis Rjabov.

La boato tuŝis la malaltan bordon, Silvestro Petroviĉ malrapide ekiris al la placo, trapuŝiĝis inter laboruloj kaj trovis sin apud la pendumilo, antaŭ kiu en du spaliroj staris preobraĵenskanoj. Ĉiu el ili en la mano havis elastan vergon, kaj per tiuj vergoj la gvardianoj svinge kun retiro estis vipantaj nudan ĝis zono altan soldaton, kiu malrapide kaj lace iris kun la manoj, alligitaj al fusilo. Iom poste Silvestro Petroviĉ komprenis, ke la soldato ne iras mem — lin trenas du serĝentoj, kaj la vojo de la soldato kondukas al la pendumilo. Tiel sub ŝrikado de fluto kaj krakado de tamburo oni alkondukis lin al la malalta eŝafodo kaj starigis sur la genuojn. La nuda dorso de la soldato nigriĝis kaj ŝvelis, kaj en kelkaj

lokoj estis kvazaŭ disŝirita, lia vizaĝo, sensanga, sekiĝinta, havis nenian esprimon, nur terure bluis la blankoj de la duonfermitaj okuloj...

— Kiu estas? — demandis Ievlev starintan apude mornan oficiron kun brulvundita vango.

La oficiro strabis al la subadmiralo, respondis, malfacile movante la lipojn, kripligitajn de la brulvundo:

— Ĉi kanajlo de atako fuĝis, el barko elsaltis kaj kaŝiĝis en arbaro, kaj en lia sako estis meĉoj, sinjoro subadmiralo. Sen meĉoj grenadaj ni restis...

Li silentis iom, forturniĝinte, poste aldonis:

— Estas ordonite pro ĉi latronaĵo ĉi perfidulon post vipado ekzekuti morte per pendumo kaj sen pekkonfeso, kaj ankaŭ sen eŭĥaristio, kun kraĉado al la vizaĝo...

Armea ekzekutisto, viro malrapidema kaj fortika, — deligis la kondamniton de la fusilo, levis de la genuoj, trifoje kraĉis en lian blankan, jam mortan vizaĝon kaj surĵetis sur lian kolon maŝon. La tamburoj ekbatis malakorde, la fluto ekfajfis. La ekzekutisto ĵetis rigardon al sekretario Ŝafirov — ĉu li diros subite malkondamnon. Ŝafirov, sidante sur ĉevalo, svingis blankan tukon. La ekzekutisto kraĉis al la polmoj, prenis finon de kanaba ŝnuro, per piedbato elbatis el sub la ekzekutato benkon. En subite estiĝinta silento aŭdiĝis komando, la gvardianoj kaj soldatoj levis la fusilojn por prezento.

Silvestro Petroviĉ, reveninte en sian tendon, eltrinkis kruĉeton da sbiteno, retenis tremon en si, intencis kuŝiĝi, sed ŝanĝis sian intencon, ekdeziris reveni al homoj. Kiam, elfuminte pipon, li eliris en la tendaron, sur la fortreso

Ŝluselburgo — Ŝlosilurbo oni estis levantaj la rusan trikoloran flagon.

La soldatojn post la plenumo de la ekzekuta ceremonio oni reordigis kun la vizaĝoj al Nevo, artileriistoj ekstaris kun bruligitaj meĉoj ĉe siaj kanonoj. Sur la fregatoj «Sankta Spirito» kaj «Kuriero» oni same prepariĝis al pafado.

Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov — bombardisto, leŭtenanto de la Preobraĵenska regimento, nuna gubernatoro kaj komandanto de Ŝluselburgo — per du manoj, egale komencis streĉi la ŝnuron, la grandega tuko malrapide ekrampis sur la nova flagstango de la Cara turo al la malvarma aŭtuna ĉielo.

Vento de Ladogo, puŝinte per ekblovo, malvolvis la flagon, laŭte klakigis ĝin super la kreneloj de la turo.

Petro, starante nemalproksime de sia tendo, enpremis meĉon en fuzeon. La kanono aĥis, post ĝi malakorde ektondris aliaj pafilegoj. Ŝeremetev nelaŭte diris al la caro:

— Bonan komencon al vi, sinjoro kapitano. La nia revenis al ni. Vere — estas disronĝita la Nukseto!

Kaj li fervore, laŭ malnova rusa kutimo, tuŝinte per la mano la ĉe-Nevan teron, riverencis al la rusa flago.

Ĉapitro deka

> Mi forgesadis min, kiam temis pri utilo al la patrujo.
>
> *Suvorov*

1. Vento de la Balta maro

En aprilo trupoj de Ŝeremetev forlasis la tendaron, etendiĝintan sur la bordoj apud Oreŝko, kaj per fulmorapida marŝo ekiris tra marĉoj kaj arbaroj laŭlonge de Nevo. Sur la rivero iris barkoj, boatoj, fregatoj — veturigis kanonojn, kuglegojn, pulvon, provianton por la tuta multmilhoma rusa armeo. La soldatoj iris vigle — antaŭ la ekiro ili ricevis caran soldon, novajn bondrapajn kaftanojn, firmajn ŝuojn. En bivakoj oni kuiradis brasiksupon kun fiŝkapoj, donadis po glaseto da vodko. La terura marŝo de Njuĥĉo ĝis Ladogo instruis pri multaj aferoj.

Printempo estis malfrua, sed ĝi ekis vigle: tuj komencis varmigi la suno, ektintis rojoj, subfalis kaj fordegelis neĝoj.

Antaŭ la armeo veturis sur nigra Dona virĉevalo Boriso Petroviĉ Ŝeremetev; mallevinte la kondukilojn, enpensiĝinte, li enspiradis per la tuta brusto pinan odoron. Apud li, piedingo ĉe piedingo, bele sidis en alta hispana selo Nikito Ivanoviĉ Repnin, fiksrigardadis antaŭen — en la densan arbaron, kie estis metanta la vojon avangardo el rajdistoj kaj gvardianoj kun laboruloj. Malantaŭe, inter aliaj generaloj, same rajde sur malhelbruna ĉevalino, lace dormetis caro Petro Aleksejeviĉ. Jam dum multaj tagoj lin turmentis febro, li tute flaviĝis, liaj

lipoj sekiĝis kaj la vizaĝo kovriĝis per makuloj. Kortega kuracisto Blumentrost, veninta kun Petro el Moskvo, kuracadis lin per eliksiro de cezaro Rudolfo — el aloo, mirho, opopanakso kaj aliaj rezinoj. La eliksiro ne helpis, Blumentrost dismovadis la manojn:

— Tio signifas, Siro, ke la afero estas ne en la malsano, sed en malgajo, kiu estas en via animo...

Petro ne respondadis, postuladis aliajn kuracilojn, fervore glutadis ajnan aĉaĵon. Nenio kuracis bone.

Pasinte du trionojn de la vojo ĝis Nienŝanco, gardanta la maran buŝon de Nevo, Boriso Petroviĉ Ŝeremetev ordonis haltigi la armeon. Longa «ha-altu!» ekflugis super la gvardiaj regimentoj, super la divizio de princo Repnin, super la taĉmento de Chambers, super la regimentoj de Jakobo Bruce. La kavalerio estis elseliĝanta, la infanterio aranĝis sin por ripozo. La feldmarŝalo ordonis kunvenigi konsilion. Petro, ĝemante, malfacile deĉevaliĝis, lin ĉirkaŭis generaloj. Repnin dismetis mapon. Post mallonga konsiliĝo estis decidite sendi antaŭen sur ŝipoj du mil homojn por rekognosko per batalo. Komandi la taĉmenton estis ordonite al subkolonelo Neidhardt kaj kapitano de la Preobraĵenska regimento Glebovskij. Kaj Ŝeremetev mem kun kavalerio nombre je kvin mil sabroj ekiris al Ustj-Iĵoro.

Por Petro, kiu restis ĉe la ĉefa armeo, oni sternis felton, li ekkuŝis ripozi sub la suno. Kviete, trankvile bruis maljunaj pinoj, tintadis rojo, odoris je degelantaj neĝoj, je pino, je pasintjara putraĵo. Aŭdeblis, kiel nemalproksime trankvile konversacias Ievlev, Rjabov kaj la lokaj fiŝistoj — Onufrio Ĥudolejev kun knaboj Simono kaj Stefano — pri ŝanelo de

rivero Nevo.

— Ne tiel! — diris Rjabov. — De la Transfiguriĝa monto mem la ŝipa vojo estas meze de la rivero, kaj ne pli ol kvindek klaftojn. Kaj ĉe la buŝo de Dubrovko estas malprofundaĵo — vi iradas sur platboatoj kaj ne mezuris. Ĝuste tie fregato surgrundiĝos...

Ievlev ekridis:

— Li pri ĉi afero estas spertulo — kiel surgrundigi...

La Ladogaj fiŝistoj ĉiuj kune ekdisputis:

— Ne estas malprofundaĵo! Ni kiom multe...

— Do ĉu ni vetu? — demandis Rjabov — Antaŭ nelonge pri Pelo vi same svingis la langojn, ke ne estas tie sablaĵoj, kaj reale kio troviĝis?

Petro suspiris, tiris sin. Li havis febron, lia rigardo estis malklara, li ofte lekadis la lipojn, kraĉadis flanken. La kortega kuracisto alportis trinkaĵon en glaso, la caro lipis, sed ne trinkis.

— Vi serĉus por mi, eble, oksikokon...

Malvarmajn, subneĝajn oksikokberojn li suĉis kun plezuro. Poste vokis Ievlev-on, demandis:

— Ĉu mesaĝistoj ne estis?

— Ne estis, Petro Aleksejeviĉ...

Petro por momento fermis la okulojn. Estis videble, ke li suferas. Apud li, kovrita per ŝtono kontraŭ vento, kuŝis la mapo, li ree malfaldis ĝin, komencis demandi la fiŝistojn, kie kio situas sur Nevo trans Nienŝanco. La fiŝistoj timide

montradis: jen sur ĉi rivereto — kiel ĝi nomiĝas, ni ne scias, — apud Nevo estas granda ĝardeno de sveda majoro Konau. Ĉi tie estas vilaĝeto je kvin kortoj, fojnon oni tie falĉas ĝis cent stakojn, grenon semas ĉirkaŭ dudek korbojn, ne pli. Ĉi tie — Bazila insulo[148] nomiĝas ĉi loko — estas ĉaskastelo de sinjoro svedo Jakobo de la Gardie, el ĉi tie li kaj ursojn ĉasas, kaj lupojn, kaj alkojn. Bona ĉasado. Ĉi tie, sur la Tomasa insulo, estas bieno Birkenholm, granda, la barono tenas rusajn laborulojn ĝis du cent. Kaj vilaĝeto ĉe ĝi estas je ĉirkaŭ kvardek kortoj. Ĉi tie estas ja pli seke, sed ĉirkaŭe, probable, ĉie estas marĉegoj, seka loko ne troveblas. Nur eble Jänissaari[149] estas iom pli seka... Ĉi tie estas vilaĝo Vralovĉino, ĉi tie — bieno de Pervuŝin. Vojoj ne estas, nur padoj inter marĉoj...

Petro aŭskultis, mordetante la sekajn lipojn, oscedetante pro leviĝanta febro. Poste, laciĝinte de la fiŝistoj, malsimpatie demandis:

— Ĉu Vinius sendis la kanonojn?

Silvestro Petroviĉ singarde respondis, ke, eble, ili atingis Ŝluselburgon, sed ĉi tie dume oni ne aŭdis.

— Ne aŭdis, vi diras? — subridis Petro. — Hodiaŭ mi al Romodanovskij skribos — dancos ĉe li la olda kapro, urĝe komencos fari la aferon...

Kaj duonkuŝante sur la felto, en maloportuna pozo li

---

148 La Bazila insulo (Васильевский остров) nun estas parto de Sankt-Peterburgo *(trad.)*

149 Jänissaari en la finna signifas Lepora insulo, nun ĝi sub la nomo Lepora insulo (Заячий остров) estas en la centro de Sankt-Peterburgo, sur ĝi Petro fondis la Petropaŭlan fortreson, de kiu komenciĝis la konstruado de Sankt-Peterburgo *(trad.)*

komencis rapide skribi:

«Siro! Mi sciigas, ke ĉi tie estas granda manko de livero de artilerio, pri kio mi sendas liston, kio la plej necesa ne estis ĝisliverita: 3033 bomboj tripudaj, tuboj 7978; da plumberoj kaj meĉoj eĉ ne unu funto; fosiloj kaj pioĉoj feraj plej malgranda kvanto; kaj plej grave majstroj, kiuj ŝraŭbas fuzeojn de kanonoj, ĝis la nuna horo ne estis senditaj, pro kio el la pasintjaraj kanonoj eĉ unu por militiro ne taŭgos, pro kio por ni ĉi tie estas granda halto de la afero... Pri kio mi mem multfoje diradis al Vinius, kiu responde regalis min per Moskva «tujo». Pri tio bonvolu lin pridemandi: por kio tiel estas farata la tiom grava afero kun tia neglekto, kiu kostas mil liajn kapojn? El la apoteko eĉ unu zolotniko[150] da kuraciloj ne estis sendita: pro tio ni estos devigitaj kuraci tiujn, kiuj tion neglektas...»

Li finskribis, pensis iom, poste, leginte laŭte al Ievlev, demandis:

— Ĉu tio estis ĉe Ustj-Iĵoro, ke princo Aleksandro la Neva Birger-on frakasis[151]?

Silvestro Petroviĉ kapjesis:

— Ĉe ĝi, Siro. Ĝis Ustj-Iĵoro li lin pelis, kaj la batalo ja estis pli frue. Estis dirite en la kroniko, ke venis svedoj en forto granda kaj norvegoj kaj finnoj en ŝipoj, svedoj kun princo kaj

---

150 Zolotniko — malnova rusa mezurunuo de pezo (maso), 1/96 de funto aŭ 4.266 gramoj *(trad.)*

151 Aleksandro Jaroslaviĉ, alnomita la Neva (1221–1263) — princo Novgoroda, grandprinco de Kievo, grandprinco de Vladimiro, militestro, sanktulo de la Rusa ortodoksa eklezio. En 1240 okazis batalo ĉe la Neva buŝo de rivero Iĵoro (rusa radiko «ustj» signifas «buŝo de rivero») inter la Novgoroda kaj sveda armeoj. Jarlo Birger Magnusson (1210–1266) — tiama reganto de Svedio *(trad.)*

episkopo sia, kaj ekstaris ĉe Nevo en la buŝo de Iĵoro, volante akiri Ladogon...

— Akiri! — severe, per rando de la buŝo subridis Petro.

En Ustj-Iĵoro por Petro estis konstruita tendo. Aleksandro Daniloviĉ estis rostanta sur bajoneto super flamo de lignofajro bonan pecon da ŝafaĵo, rakontis gaje:

— Vi, *Min Her*, rigardu ĉirkaŭe, kio fariĝas: rusaj kampuloj venis nemezureble, de ĉie el sub la svedo ili al vi rifuĝas. Kaj manĝaĵojn ili alportis, kaj lakton, kaj kazeon, je Dio, kvazaŭ ie ĉe Volgo aŭ ĉe Moskvo-rivero. Kaj virinoj kaj knabinoj, aŭskultu, kantojn malnovajn kantas...

Petro foriris en la tendon. Menŝikov, finrostante la viandon, kun malgajo diris subite al Nikito Ivanoviĉ Repnin:

— Venis, amasiĝis popolo... Sed kiam ili ekkonos nian vivon, kiam oni komencos de ili impostojn ŝiri, kiam pelos al ŝipkonstruado...

Li skuis la kapon, suspiris:

— Ho, princo... Pri Vinius ĉu vi aŭdis? Ekiris letero al Moskvo al nia amiko bona, Teodoro Jurijeviĉ. Pereis la maljunulo...

Repnin kuntiris la brovojn, respondis obtuze:

— Iru ĝi ĉio for, eĉ pensi mi ne povas, la kapo krevas...

Petro sidis en la tendo sur benko, antaŭ li ĉe la tablo staris Glebovskij kaj germano Neidhardt. La kapitano — ĝisblue pala, kun kolo, trapafita hodiaŭ per sveda kuglo — per furioza voĉo estis rakontanta, ke sinjoro subkolonelo ne bonvolis subteni lin dum la atako — li pretekstis, ke ordonon ne havas;

la malamiko faris embuskon — dragonojn; malgraŭ ĉi cirkonstanco, la dragonoj estis debatitaj kaj la remparo estis prenita, tamen la svedoj de la persekuto foriris kaj ŝlosiĝis en Nienŝanco, dum la venko povus esti plena...

— Nu, subkolonelo? — demandis Petro.

— Mi ne havis ordon'.

— Sed ĉu okulojn vi havis? Orelojn havis? Kapon?

— Mi ne havis ordon', — kun digno, trankvile ripetis la germano. — Mi ne havis ordon'. Kaj kiam mi ne havis ordon', tiam mi ne faris atak'.

— Iru for! — kun trankvila kolero diris Petro al Neidhardt.

La germano eliris, alte portante la kapon, tintante per arĝentaj radetoj de la spronoj.

— Glebovskij! — vokis Petro.

Tiu, ne movante la kapon pro terura doloro en la kolo, kie fiksiĝis la kuglo, alvenis pli proksime, ekstaris en atentopozo.

— Ordonon li ne havis! — subite kriis Petro. — Ĉu vi komprenis? Ne havis ordonon! Kaj vere, ne havis! Kaj plie li nenion povas kompreni! Kaj vin mi ne kulpigas. Vi ĉion faris kiel necesas! Ne kulpigas! Iru! Diru tie al mia kuracisto, ke li la kuglon el vi eltiru...

Glebovskij staris senmove, el liaj okuloj rampis larmoj.

— Nu? — incitiĝante, demandis Petro. — Kion ankoraŭ? Kial vi ploras, kiel inaĉo?

— Da popolo ĉe mi pereis tridek du homoj, — diris Glebovskij. — Mi kun ili, Siro...

— Mi ne kulpigas! — kriis Petro per alta, ne propra voĉo. — Mi diris, ne kulpigas! Kaj ke pereis... Nu, pereis, kion vi de mi ja atendas? Iru el ĉi tie, iru, kion vi ankoraŭ bezonas...

Glebovskij eliris. Petro kuŝiĝis sur la liton, kovris sin, buliĝis, kiel en infaneco. Klakadis la dentoj, svenadis la koro, kune kun la lito li jen flugis ien malsupren, en la inferon, jen estis levata sub forajn nigrajn nubojn. Estis terure, morta angoro turmentis lin tutan, per lamenta voĉo li vokis:

— He, kiu estas tie! Menŝikov-on al mi, la gubernatoron Ŝluselburgan!

La servosoldato kuris por Aleksandro Daniloviĉ, tiu eksidis apud Petro, ekparolis grumble-karese, kun bonkora riproĉo:

— Jen kion vi elpensis, *Min Her*, ekmalsanis antaŭ la afero... Kaj lasu, nenien vi flugas, ĉio ŝajnas. Tiel la febro vin turmentas, tremaĵo damnita. Ni tuj Blumentrost-on vokos...

— Iru li for, ne necesas! — petis Petro.

— Kaj se ne necesas, tiam li iru al diablo, la germano. Ne necesas — tiam ni al vi, Petro Aleksejeviĉ, vodkon kun turka kapsiko donos, vi pro ĝi konsterniĝos, ŝvitos, kaj tiam ni la subveston ŝanĝos, en la seka vi ekdormos. Vi, *Min Her*, laciĝis, jen kio...

Pro la voĉo de Menŝikov fariĝis kvazaŭ pli trankvile, la lito ĉesis subfali, la varma mano de Daniloviĉ, lia milda voĉo, la karesaj vortoj — ĉio kune kvazaŭ lulis, kiel en bebaj jaroj mallaŭta kanteto de Natalia Kirilovna. Petro ekdormetis, sed en dormo plendis:

— Ne scias mi, ne scias, ho Dio mizerikorda!

— Lasu, *Min Her*, kion vi tie ne scias! — vekis lin Menŝikov. — Dormu kaj dormu...

Sur la piedpintoj, singarde eniris Blumentrost, minacis al Menŝikov per la fingro, elprenis el la poŝo flakonon, prononcis nekompreneblajn vortojn:

— *Essentia Martis operativa cum suco pomorum*, havas forton dividan kaj nutran...

Menŝikov flaris la esencon, suspiris, kaj kiam Blumentrost foriris — elverŝis la flakonon trans la kurtenon de la tendo. Poste pro enuo kaj por tempopasigo li eksidis skribi leteron. Li sciis skribi tre malbone — kunigadis literojn unu kun alia en kurban vicon kaj preskaŭ antaŭ ĉiu enpensiĝadis.

«Daria Miĥajlovna, Barbara Miĥajlovna, estu sanaj por multaj jaroj! Danke mi al viaj moŝtoj riverencas, ke vi bonvolas al mi skribi pri via sano...»

Ĉi tie li por longe enpensiĝis. Al Daria Miĥajlovna li delonge intencis edziĝi, kaj skribis al ambaŭ fratinoj Arsenjev-oj, kiuj vivis ĉe la palaco de caridino Natalia Aleksejevna. Necesis en la letero delikate kaj kun ĝentileco aludi pri sia sento al Daria. Kaj Aleksandro Danilovič ree komencis almeti literojn unu al alia:

«Tre dankas mi pro via al mi nehipokrita amo, pro la favora sendaĵo, al Daria Miĥajlovna pro la ĉemizo kaj pro la diamanta koro... Ne kara estas al mi diamanta koro, sed kara estas via al mi favoro...»

Subskribis li per tre grandaj literoj tiel:

«Gubernatoro Ŝluselburga kaj komandanto, bombardisto leŭtenanto Preobraĵenska kaj kavaliro Aleksandro Menŝikov...»

Petro nelaŭte vokis:

— Danilovi‌ĉ, kion vi tie skriba‌ĉas?

Menŝikov facile rozkoloriĝis, viŝis ŝviton de la frunto, respondis:

— Ne gravas, *Min Her*, al Preobra‌ĵenskoje estas ia letereto...

— Montru...

— Sed, *Min Her*...

— Montru! — ordonis Petro.

Aleksandro Danilovi‌ĉ donis la leteron, kandelon.

— Jen kiel! — diris Petro. — Kial do vi estas kavaliro?

— Sed ja, *Min Her*, nu kio, je Dio, — ekparolis Menŝikov. — Ĉiuj tiel skribas, mi ja ne estas pli malbona ol iuj...

— La kavaliron — formakulu! — ordonis Petro.

Menŝikov suspiris.

Petro diris edife:

— Vi, frato, estas ankoraŭ ne kavaliro, sed kokido, — tion memoru firme. Kaj ne orgojlu. Se vi servos bone — atingos ankaŭ kavalirecon. Kuŝiĝu, dormu...

Aleksandro Danilovi‌ĉ makulis per inko la vorton «kavaliro» kaj kuŝiĝis dormi.

Matene la caro ekfartis pli bone. La dudek naŭan de aprilo li kun sekvantaro ekvidis la remparojn de Nienŝanco, ĉirkaŭitajn de regimentoj de la sieĝa korpuso de Chambers kaj Bruce. La divizio de Repnin jam transpasis sur la dekstran bordon de Oĥto kaj ĉirkaŭis la urbon Nienon — de Oĥto ĝis Nevo. Tie, en la kupre verda vespera ĉielo estis degelantaj fumoj de sveda

setlejo...

— Tie estas la maro! — diris Petro, almontrante per skurĝo antaŭen.

Pro febro al li brilis la okuloj kaj sur la pometoj aperis ruĝo, sed al ĉiuj ĉirkaŭ li ŝajnis, ke li estas sana, vigla kaj gaja. Kaj li vere estis gaja.

— Ĉu mi ĝuste diras, Silvestro? — demandis Petro. — Ĉu tie ĝi estas, la maro, la Balta? Ĉu mi tien almontras?

— Tien! — respondis Ievlev. — Tie ĝi estas — la Varenga maro. De ĉi tie estis komenciĝanta la antikva vojo — de varengoj al grekoj.

La generaloj, sinjoroj konsilio, rigardis antaŭen kun tuta diligenteco, sed vidis nenion, krom malpeza vespera nebuleto, stranga, ekzota ĉielo kaj pinto de sveda preĝejo.

2. Ĉe Nienŝanco

Mankis platformoj por mortiroj, fasĉinoj kaj gabioj, mankis fosiloj kaj pioĉoj, bomboj, sakoj kun lano.

Kun grandegaj penoj, sub pafado de svedaj baterioj, oni konstruis la lastan tranĉeon kaj aranĝis pasejojn al ĝi. Jegoro Rezen estis aranĝanta mortiran baterion ĉe lageto ĉe la pinto de la Oĥta golfo; kanonojn estis aranĝanta general-inĝeniero Lambert. Petro vizitadis jen Rezen-on, jen Lambert-on, mem en la aferon ne tro enmiksiĝadis, sed observadis kun intereso. Aleksandro Daniloviĉ Menŝikov dufoje timigis la svedojn — «faris komedion», kvazaŭ li kun ĉasistoj iras ataki. La svedoj ĵetadis bombojn, ŝtonojn en ĉarpentaĵoj, pafis per mitrajlo...

Post la tagmezo ekbatis tamburoj. Sesdek boatoj kun kvar rotoj de semenovskanoj kaj tri de preobraĵenskanoj ekiris malsupren laŭ la fluo de la rivero — por esploro de ties buŝoj kaj marbordoj. De fortresaj fortikaĵoj komenciĝis kanona pafado, sed la kuglegoj ne atingadis la ŝiparon, kaj la gvardianoj kriadis al la svedoj maldecajn vortojn, insultante iliajn artileriistojn...

Petro rigardis al la kvietaj riveraj akvoj avide, parolis kun neniu, atendis la maron. Krom Rjabov kaj Ievlev neniu bone komprenis, kien tiel atente kaj fikse rigardas la bombarda kapitano...

Al la maro ili venis malfrue, jam estis krepusko, perla nebuleto falis sur mallaŭte susurantajn akvojn; sed akre, speciale alloge odoris la mara foro; el la nebuleto, renkonten al la ŝiparo, sub oblikva mara velo iris boato de finna fiŝisto, duboj ne plu restis: tio estas la Balta maro...

Longe en silento Petro fumis sian pipon, longe rigardis antaŭen, poste subite abrupte tiris la ŝultron, diris malmilde:

— Ŝipoj necesas, Silvestro, kaj multe! Floto! Por kio boatoj...

Kaj ordonis:

— Al la bordo!

Ĉe apudborda bieneto staris mallongkrura, kun kruda pro vento, ruĝa sulka vizaĝeto finna fiŝisto. Blonda nepeto alpremiĝis al liaj kruroj.

— Kiu vi estas? — demandis Petro la maljunulon.

Tiu pensis iom, ekstaris pli rekte, elmetis antaŭen la

mentonon, respondis fiere:

— Kiu mi eestass? Mi eestass fiŝista staroosto. Sed ŭi mem kiu eestass, ha?

Petro serioze, sen subrido respondis:

— Mi estas la rusa caro.

La finno elkraĉis malproksimen en akvon nigran tabakan maĉaĵon, ekrigardis al Petro, levinte la kapon, demalsupre supren, palpebrumis, suspiris, ekkredinte:

— Saame nemalkraanta poosteno. Klopotoj muultass por saaro, ha?

Soldatoj-gvardianoj subridadis, starante ĉirkaŭe. Petro malgaje respondis:

— Multas, oldulo, klopodoj. Tio estas vero. Ni apenaŭ sukcesas...

— Ankaŭ mi apenaŭ suksesass. Ŝiu laŭ si farass, ŝiu mem eestass saaza... Tamnitaj tiaploj... Tie fiŝiisto Tuskala preenis reeton, mi al li diiriss...

Petro ne aŭskultis, demandis, ĉu regalos lin la starosto en la bieneto per lakto. La finno ruze ekrigardis al la caro, al Ievlev, al Menŝikov, al grandega Rjabov, ĉirkaŭrigardis la gvardianojn, respondis:

— Unu foojon mi rekaaloss ŝiujn kaj mem moortoss pro malsaat'.

Sed lakton kaj sekalan flanon li elportis. La gvardianoj aĉetis en najbara bieneto strangan fiŝon — eperlanon, odorantan je freŝa fojno, aranĝis lignofajron, kuiris fiŝsupon. La ora suno, dispelante per sia varma lumo la nebuleton, estis

leviĝanta super la kvietaj akvoj. Aleksandro Danilovič disdonadis al la finnoj foliojn, liveritajn el Moskvo; tie estis skribite, ke por ĉiuj lokaj ĉe-Nevaj loĝantoj sub la mano de la caro de la tuta granda kaj malgranda kaj blanka Rusujo estos kvieto, justo, kaj nenian damaĝon ili atendu. Bombarda serĝento Ŝĉepotev, lerta ulo, dum estis legataj la folioj, marĉandis kun lokanoj pri du bovinoj, kaj bona virporketo, kaj ankoraŭ boveto. La finnoj por provo postulis pli grandan prezon. Ŝĉepotev, plendinte pri prezalteco, metis sur tablon ormoneron. La finnoj alkondukis ankoraŭ bovinon, du porkidojn, komencis haki kapojn al anseroj kaj anasoj. Ŝĉepotev diris:

— Vi iru ĉe fortreson Nienŝancon, tie faru bazaron. Soldatoj ĉe ni multas, oficiroj, generaloj, la homoj estas riĉaj, ĉiu deziras kokan nudelsupon manĝi. Vi vendos profite, bonege vivos. Kaj fiŝon veturigu por vendo.

— Ĉu eperlanon veturigi? — demandis la starosto.

— Kaj eperlanon, kaj ion, kio estas pli bona. Kaj nin vi, amikoj, ne timu. Ni sur nian propran teron eliris, ĉi tie rusianoj de antikveco staradis. Kaj ni por vi malbonon ne faros. Vi por ni laboru, ni vin ne ofendos... Svedoj ĉi tie baldaŭ ne estos, ĉi tie, sinjoro starosto, ili ne havas aferojn...

La maljunulo, flatita de la ĝentileco de Ŝĉepotev, kontenta pri la grandaj komercaj operacioj, kiuj okazis apud lia bieneto, elprenis el post la forno botelon de verda vitro, verŝis en kruĉetojn odoraĉan malhelan vodkon. Petro lipis, almanĝetis kazeon, leviĝis. La starosto, akompanante la rusan caron al la boato, plendis:

— Ŝi tie fiŝiisto Tuskala preeniss reeton, mi diiriss: ŭi la

reeton peerdoss, sed fiŝiisto Tuskala — ne, ne... Ŭi, saaro, ŭooku Tuskala, ŭi diiru al li...

Petro, eksidante en la boaton, respondis:

— Pri Tuskala vi, sinjoro starosto, mem decidos... Mi da aferoj eĉ sen Tuskala havas jen — ĝis la gorĝo...

La tridekan de aprilo komenciĝis bombardado de la fortreso. En la komenco mem, ĉe la noktomezo, en Nienŝanco ekbrulis armila tenejo. Celante al la furiozanta flamo, salvis samtempe ĉiuj sieĝaj kanonoj...

Matene el la komandejo de feldmarŝalo Ŝeremetev per malrapidaj paŝoj al la remparoj de la fortreso ekiris rusa trumpetisto. Sur li estis novega Preobraĵenska kaftano, skarpo, mallonga spado, plumaĵo sur la trikorna ĉapelo. La trumpeton li portis, apoginte ĝin al la femuro, per la funelo antaŭen. Gvardianoj interdiradis:

— Fratoj, ja tio estas Tiĥono Bugajev, el la unua roto...

— Tute ne Tiĥono, tio estas cara trumpetisto Lobzin.

— Antipo, sed ne Lobzin...

— Vidu, kiom gravaspekta. Kaj kruringoj novaj estis eldonitaj...

— Ja ne vane! Vidu la svedaj diabloj — la trumpetisto estas bonstata...

La trumpetisto Simono Prokundin, ne riverencante al kugloj, eliris antaŭ la pordegon mem de la fortreso, metis la manon sur la flankon; lerte levinte la trumpeton, ludis «elvokon». Sur la pordega turo aperis du svedaj tamburistoj, respondis per tamburado. La trumpetisto trumpetis ankoraŭ foje. Kun longa

knaro malfermiĝis la pordego, post ĝi en kirasoj, en helmoj, kun pretaj lancoj staris svedoj — por okazo, se la trumpetisto kondukus post si taĉmenton.

Taĉmento ne estis. En la rusa tendaro oni vidis: la trumpetisto estis renkontita kun honoro — oficiro en blankaj gantoj ĝentile donis stanan teleron, sur ĝi staris glaseto da vodko. La lancistoj prezentis la lancojn, la pordego fermiĝis. Militi oni dume ĉesis. Gvardianoj sekure iradis sub la muroj de la citadelo, interparolante kun svedoj, ke tempas por tiuj foriri, sidado en fortreso ne finiĝos bone. La svedoj klarigadis per gestoj — ni estas homoj malgrandaj, super ni estas estroj.

La parlamentarion oni atendis tre longe.

La respondon trumpetisto Prokundin enmanigis al Boriso Petroviĉ Ŝeremetev. Petro legis el trans la ŝultro de la feldmarŝalo. La svedoj skribis, ke la fortreso estis donita al ili de la reĝo por defendo kaj la mizerikordan kapitulacon ili devas rifuzi.

— Pafadi salve sen kompato ĝis kapitulaco! — ordonis Ŝeremetev. — Sufiĉas babili vane.

Tuj ektondris ĉiuj kanonoj kaj ĉiuj mortiroj samtempe. Oĥto kovriĝis per griza fumo. Oni pafadis salve — dum la tuta nokto senĉese. Kuglegoj faladis en la fortreson, trabatadis tegmentojn de domoj, detruadis proviantajn tenejojn, gardistajn budojn, fortresan soldatan kuirejon. Ĉe mateniĝo interne de Nienŝanco komenciĝis ankoraŭ unu incendio, kaj baldaŭ sur remparo de la fortreso aperis svedo-tamburisto kaj tamburis «kapitulacon». La sieĝaj baterioj eksilentis. En la tendon de Ŝeremetev venis pala sveda majoro en griza uniformo — alportis malnetaĵon de kondiĉoj de kapitulaco. Petro, maĉante porohavan panpinton,

per severa voĉo diris:

— Tion al diabla patrino! En la pasinta fojo preskaŭ eksplodigis al ni Oreŝkon iliaj gardistoj. Niajn gardistojn enpostenigi tuj, kaj iliajn ĉiujn elirigi ekster la citadelon...

Kaj, preninte plumon, li komencis korekti la kondiĉojn.

Je la deka horo de mateno internen de la fortreso kun malvolvita standardo, sub kantado de trumpetoj kaj batado de tamburoj, eniris la Preobraĵenska regimento, kaj en la palisarojn — sur la kovrita vojo — la Semenovska. Hele lumis la suno, ludis sur trumpetoj, sur spadoj, sur ŝtalo de bajonetoj. Svedoj — eminentaj loĝantoj de Nieno, kaŝintaj sin en la nealirebla, kiel ŝajnis al ili, fortreso, — kun mirego rigardis al la rusoj, kvazaŭ ne kredante al siaj okuloj, demandadis unu la alian: ĉu vere tio okazis, ĉu vere falis Nienŝanco...

Kaj la bombardista leŭtenanto Menŝikov, ludante per siaj friponaj gajaj okuloj, kriante «livan, livan, knaboj, penu!», tenante la spadon prezentita, kondukis siajn aglojn preter sinjoro vic-advokato Hertz, preter Christian Rosenmüller — distrikta juĝisto, preter Axel Lielgren — provoso, preter sinjoro Lindemark — dogana inspektisto en Nieno, preter iliaj edzinoj kaj filinoj, preter oficiroj de la kapitulacinta fortreso — al la pulvotenejoj, al la arsenalo, al kanonoj, al la bastionoj. Apud li, penante paŝi samtakte, hastis lertmova sveda leŭtenanto, skrupule klarigante:

— Tiu bastiono nomiĝas Helmfelt-a, tiu — Kervill-a, kaj tiu ĉi laŭ la nomo de nia glorega reĝo — Karola...

Menŝikov subite haltis, diris en la rusa, laŭte, tiel ke la soldatoj aŭdis:

— Iru do vi, oficiro, de ĉi tie tien kaj tien! Karola! Ni la bastionojn mem baptos, sen via sugesto! Iru for de mi! Tedis!

La oficiro sufokiĝis, kaptis la spadon. Menŝikov kun fera vizaĝo, kun aparta rideto sur la maldikaj lipoj, konsilis:

— Vi ĉi manierojn forgesu. Mi batos al la muzelo — vi dum jaro ne rekonsciiĝos, kanajlo! Vidu la pugnon!

Kaj singarde, por ke ne rimarku la svedaj damoj, montris al la svedo la pugnegon kun ŝvelintaj bluaj vejnoj.

La svedoj tiutempe estis elirantaj el la fortreso. La eminentaj urbanoj kun pakoj en la manoj, kun sakoj kaj kofroj serĉis, kie lui ĉevalojn, — iliaj kaleŝoj, veturiloj kaj ĉevaloj estis deprenitaj de la rusa armeo. Johan-Henrik Frijsenholm, ricevinta titolon de barono pro tio, ke donis al Karolo monon por milito kontraŭ la moskvianoj, nejuna viro kun granda ventro, senfortiĝante sub pezo de sia kofro, diris al la fiska vic-advokato Hertz:

— Nu, kion vi diros pri ĉio ĉi, *herre* vic-advokato? Mi ne domaĝis tutan mian kapitalon, mi fordonis eĉ la doton de la edzino, mi fordonis monon de miaj infanoj — kaj por kio? Por perdi nian Nienon kaj nian fortreson...

— Ne por longe, *herre* Frijsenholm, — diris la vic-advokato. — Tute por ne longe. La floto de admiralo Nummers estas proksima, ne pasos eĉ semajno, kiam sveda balailo forbalaos el ĉi tie tiun moskvian rubon. Kaj ni konstruos novan Nienon kaj novan fortreson — tiom neatingeblan...

— Nur ne per mia mono! — interrompis Frijsenholm. — Kio koncernas min, do mi ne donos eĉ unu ŝilingon pli. Kredu al mia honesta vorto, *herre* vic-advokato!

3. «Astrild» kaj «Gedan»[152]

Menŝikov, retrokliniĝinte, sidis en malvarmeto kontraŭ ĵus kaptita en la maro svedo, pridemandante lin per tradukisto:

— Ĉu maristo?

La svedo silentis, viŝadis la buŝon per verda fulardo. Bombarda serĝento Ŝĉepotev diris el post la dorso de Aleksandro Daniloviĉ:

— Ja ni vidis, kiel oni lin, diablon, sur boaton mallevis. Kun li ankoraŭ homoj estis, tiuj evidentiĝis pli lertaj ol li — ne trafis en la embuskon.

Menŝikov pensis, demandis poste:

— Ĉu vi estas el la ŝipoj, kiuj iras al Nienŝanco, por fari helpon? Kion estis al vi ordonite montri al la fortresa komandanto?

Petro elmalproksime diris:

— Lasu lin, Daniloviĉ! Li faris militistan ĵuron. Ni mem divenos...

Sed la svedo subite demandis, kiom oni pagos al li, se li ĉion diros vere. Rjabov tiris Ievlev-on ĉe la maniko, avertis:

— Vi, Silvestro Petroviĉ, diru al Menŝikov: trompos la svedo. Mi same tiel marĉandis.

Sed la svedo ne trompis, dirinte, ke al du konvenciaj pafoj de la eskadro de Nummers la fortreso devas respondi same per du pafoj. Estis farite ĝuste tiel. Ĉasistoj de la marbordo sciigis, ke la svedaj ŝipoj, aŭdinte respondon al sia signalo, trankvile

---

152 Realaj nomoj de svedaj ŝipoj: dumasta militŝipo «Astrild» kaj unumasta militboato «Gedan», partoprenintaj batalon, okazintan en 1703 *(trad.)*

ĵetis ankrojn. Aleksandro Daniloviĉ dekalkulis al la svedo monon, sed malpli, ol ili interkonsentis. La svedo ofendiĝis, Aleksandro Daniloviĉ kriis:

— Vi ankoraŭ insultas, hundaĉo! Tridek ormonerojn mi al vi donis, pli, ol al Judaso, tiu havis arĝenton, kaj vi oron!

De la Arbusta insulo[153] ree venis mesaĝisto el lertaj knaboj de Ŝĉepotev, rakontis, ke du malamikaj ŝipoj alvenis al la buŝo mem de Granda Nevo kaj atendas matenon, por iri al rivero Oĥto. Petro kunvenigis konsilion. Silvestro Petroviĉ ekparolis la unua:

— Niajn fregatojn por ĉi afero ne indas uzi, Siro. Ni povas misfortune perdi ilin, — ili estas niaj unuaj militaj ŝipoj ĉi tie. Ni ankoraŭ longe atendos aliajn. Iri necesas per boatoj...

Menŝikov koleriĝis:

— Absurdaĵon vi diras, Silvestro! Kiel kontraŭ la svedoj fari ŝipatakon? Dum ni el boatoj elgrimpos — ili nin ĉiujn mortigos...

Chambers konsentis kun suspiro:

— De boatoj sur ŝipojn — ne eblas. Malbone.

Bruce dismovis la manojn:

— Malfacile, Siro...

Petro ĉirkaŭrigardis, serĉis per la okuloj, kriis voki la unuan piloton. Tiu diris singarde:

— Sed ja dependas de tio, kiel fari, Petro Aleksejeviĉ! Se iri stulte — ili nin mortigos, sed se saĝe — ni ilin finos. Se sur

153 Finne *Vitsasaari*, nun nomiĝas Gutujeva insulo kaj troviĝas en Sankt-Peterburgo *(trad.)*

Nevo al ili iri — ili rimarkos, necesas kaŝe. Eksciis mi de la lokaj fiŝistoj, kaj hodiaŭ ankaŭ mem rigardis — estas ankoraŭ unu rivereto, boatoj ĝin trairos, sur tiu rivereto ni eliros...

La caro por longe enpensiĝis. Chambers dormis side, Bruce per lacaj okuloj rigardis al la plenakva, briletanta sub la suno Nevo. Ŝeremetev tuŝis la manon de Petro, diris nelaŭte:

— La piloto prave diras. Ĝuste tiel necesas agi.

Ĝis krepusko du aroj de boatoj, ne rimarkitaj de la svedoj, atingis la fonton de la sennoma trafluejo[154]. Preobraĵenskanoj, semenovskanoj, lokaj fiŝistoj, Arĥangelskaj pomoroj — remis sensone, la remiloj ne knaris en la remilingoj, paroli estis malpermesite sub minaco de morto.

La nokto estis hela, kiel ĉiam en tiuj lokoj en majo, sur la ĉielo naĝis malpezaj, lanugaj nubetoj, sed la horizonto estis nuba, kaj Petro kun espero ĵetadis rigardojn al la obskuro, pendanta super la maro.

Duono de la boatoj estis lasita ĉe la fonto de la trafluejo. La alia duono kun Petro kaj Menŝikov malleviĝis malsupren al vilaĝo Kallina. Ĉi tie ili kaŝiĝis, atendante unuan grandan venintan nubon, por atako al la malamikaj ŝipoj. Estis humide, en silento Rjabov puŝis per la kubuto Petron — montris, kiel alko trinkas el la rivero akvon. Iuj el soldatoj dormetis, aliaj streĉite fiksrigardis la grizan krepuskon...

Matene malalta, griz-rufa nubo tuj kovris ambaŭ boatarojn, preobraĵenskano Zavituĥin kriis dufoje kiel gufo, la remistoj levis la remilojn. De vilaĝo Kallina la boataro de Petro iris de

154 Ĝuste tiel ĝi nomiĝis tiam (Безымянный Ерик), nun ĝi estas en la centro de Sankt-Peterburgo kaj ricevis nomon Fontanko (Фонтанка), Fontana rivereto *(trad.)*

la marborda flanko, laŭlonge de la malalta bordo de la Bazila insulo. La dua grupo de boatoj sub komando de Ievlev iris per kontraŭa kurso. «Astrild» kaj «Gedan» komencis hisi velojn, por foriri sub kovron de potencaj kanonoj de sia eskadro, sed skuala vento, mallumo, mallarĝeco de la rivero, manko de pilotoj timigis la ŝipestrojn pli, ol la nekonataj boatoj, aperintaj nemalproksime. La velojn oni decidis forigi, sed en tiuj sekundoj Zavituĥin ankoraŭ foje kriis gufe, kaj la preobraĵenskanoj kun semenovskanoj, lertaj pafistoj, komencis bati al la ŝipoj salve. La svedoj returnis siajn kanonojn, super la kapoj de la remistoj ekfajfis mitrajlo.

— Remu! — kriis Petro. — Vigle! Akorde!

La boatoj elane impetis antaŭen al la ŝipoj. Rjabov movis la rudron, la boato de Petro unua aperis ĉe la flanko de «Astrild», Ivano Sabateiĉ kaptis per la mano la ŝnureskalon, sed Petro depuŝis lin kaj kun grenado en la mano la unua leviĝis sur la ŝipon. Ĉe la alia flanko jam estis grimpantaj la preobraĵenskanoj de Ievlev, matrosoj de subleŭtenanto Kalmukov kuris sur la pobkastelo, kanonistoj de Chambers kun brulantaj meĉoj en la dentoj, kun alte levitaj grenadoj, kun tranĉiloj kaj muskedoj, estis batalantaj brusto kontraŭ brusto, per kolboj ĵetadis svedojn en la maron, tranĉadis per ponardoj. Por kelkaj momentoj fariĝis plena silento — sen eĉ unu pafo, aŭdeblis nur raŭka insultado kaj egala obtuza susurado de pluvo. Poste Rjabov vidis, kiel Ievlev ĵetis grenadon, kiel ĝia flamo faligis sur la pobferdekon du matrosojn. Al Silvestro Petroviĉ, batalante per mallonga sabro, Menŝikov estis pelanta svedan oficiron. La svedo rebatadis per spado. Aleksandro Daniloviĉ batis svinge de la ŝultro — la svedo kun dishakita

kapo falegis sub la piedojn de Ievlev. Tiutempe el luko antaŭe elŝiriĝis flamo. Rjabov ĵetis sur la lukon feltan tapiŝon, renversis barelon kun akvo. Menŝikov, deĵetante de la ŝultroj sian kaftanon, laŭdis:

— Prave vi faris, sinjoro unua piloto, la ŝipo estas bona, ankoraŭ utilos.

Sur «Gedan» tamburoj ekbatis «retiriĝon».

La pluvo forpasis, la nubojn forportis vento. Petro, sidante sur benko sub matena facila vento, estis pridemandanta kaptitojn: kiaj estas la ceteraj ŝipoj de la eskadro, kia estas admiralo Nummers, pro kia diablo ili ŝoviĝas en fremdajn landojn, per kiaj kuglegoj pafas, ĉu multe havas da provianto. La svedoj, ne kredante tion, ke ili restis vivaj, ne komprenante bone, kiel ĉio okazis, respondadis al ĉiuj demandoj detale...

Laŭ la ĉefa ŝtuparo, apud kiu jam staris rusaj matrosoj, leviĝis Boriso Petroviĉ Ŝeremetev, subridante diris al Ievlev:

— Nu, Silvestro Petroviĉ, gratulon al vi pro la viktorio, sinjoroj. Cerbumis ni kun princo Repnin, kiam navigis ĉi tien en boato: kiel dekoracii vin, kuraĝulojn. En la regularo ne estis trovite, en la pasinteco tio ne okazis — preni ŝipojn sur maro en tiela maniero. Necesas en kofroj serĉi, kiel oni faradis, ĉar ni eĉ ne scias, per kio honorigi la heroojn...

Petro diris al Ŝeremetev responde:

— Medalon ni stampos kun subskribo «Neokazinta okazas». Ĉu tiel, Silvestro?

Rjabov, starante iom malproksime, pruntepreninte de preobraĵenska soldato plastron, estis glukovranta al si vundeton sur la kolo.

— Do, tio ĉi estas la Balta maro? — demandis post lia dorso Ivaĉjo.

Ivano Sabateiĉ retroturniĝis, diris en kolero:

— Jen mi al vi la orelojn ŝiros!

Ivaĉjo retropaŝis, malferminte pro miro la buŝon.

— Ĉu la propran patron vi ne rekonis? — diris la rudristo. — Kiu al vi ordonis al la ŝipatako iri?

Ivaĉjo pensis, poste respondis:

— Al mi, paĉjo, neniu ordonis, sed kiam tamburistoj ekiris en la barkon — de la gvardio, mi pensis — de la maristoj ja ne estas eĉ unu tamburisto. Kion fari? Mi iris...

— Iris, — mokimitis Ivano Sabateiĉ. — Jen tamburisto! Ne tro vi necesas ĉi tie. Kie do estas via tamburo?

— En akvon falis, kiam ni kun la ŝipo kunkroĉiĝis! — sciigis Ivaĉjo. — Jen, solaj frapiloj restis. Kiel mi ne rimarkis? Eble la rimeno estis putra... Sed la frapiloj estas...

Kaj li montris al la patro la tamburbastonetojn.

— Nun oni vin punos! — promesis Rjabov.

Ivaĉjo suspiris:

— Ĉu vergos?

— Ja indus pro ĉiuj viaj pekoj...

— Ne vergos! — diris Ivaĉjo. — Mi alian tamburon por mi trovos.

Ili staris apude ĉe la flanko de la kaptita ŝipo, rigardis malproksimen, en degelantan sub radioj de la matena suno nebulon, pririgardadis la kurantajn akvojn de la golfo.

— Ĉu ĝi estas la maro Balta, paĉjo? — ree demandis Ivaĉjo.

— La maro estos pli malproksime! — diris Rjabov. — Kaj kie ni nun estas, kara, tio estas golfo.

Ivaĉjo ĉirkaŭrigardis — ne ŝatis, ke homoj aŭdu, kiel la patro nomas lin kara. Sed proksime neniu estis.

— Ĉu la golfo estas mara?

— Mara.

— Do — ni venis? Longe ni iris...

— Sed tamen venis!

— Venis, sed soldatoj diras: ankoraŭ bataloj estos. Ili atendas — respondos la svedo; li, ili diras, estas firma en milito, ne kutimas cedi.

— Urtiko pikanta naskiĝas, sed en supo kuiriĝas! — subridis Rjabov kaj altiris al si Ivaĉjon.

Tiu, ĉirkaŭrigardinte, ĉu ne vidas homoj, mem alpremiĝis al la patro. Tiel ili staris longe, silentis kaj rigardis malproksimen — tien, kie estis prezentiĝanta la Balta vasto.

Kiam ili estis revenantaj en la boato, Petro diris:

— Nun ni korektos, se donos Dio, nian standardon. Havis ni la Blankan, la Kaspian kaj la Azovan, nun ni donos al la aglo la originan, nian — la Baltan. Ekstaros ni sur kvar maroj...

Per la ungo li forskrapis cindron el la pipo, petis tabakon. Tabakon neniu havis. Rjabov etendis al la caro sian tabaksaketon el fiŝa veziko.

— Kia miksaĵo? — demandis Petro.

— Tranĉita radiko kun herbo meliloto...

Petro bruligis la pipon, eligis el la naztruoj densajn striojn de fumo, ekparolis nehaste, kvazaŭ ripozante post la batala laboro:

— Tiele, sinjoro unua piloto! Laboris ni sur Dvino, komencis nun labori sur Nevo. Ne facila estos, mi sentas, tiu ĉi nia laboro. Al Arĥangelsko vi eĉ ne pensu reveni. Vi esploros por mi la lokajn akvojn — ŝanelojn, profundojn, malprofundaĵojn, riverbenkojn, la golfon vi ekkonos, kun Nevaj fiŝistoj pri ĉio parolos. Vin mi poste pridemandos severe. En proksimaj tempoj estos ĉi tie floto, iros al ĝi ŝipoj el la tuta mondo, ni komencos, kun Dia helpo, komerci por bono...

Kaj, turniĝinte al Ivaĉjo, demandis:

— Ĉu estos tiel, sinjoro flota tamburisto?

Ivaĉjo, rememorinte pri la droninta tamburo, timidiĝis. Rjabov respondis anstataŭ la filo, penseme, senhaste:

— Se la maro, Siro, estas nia, tiam ankaŭ floto sur ĝi estu nia, Rusia. Kaj ke malfacila estos ĉi laboro — ĝi estas vero. Vidu, ne foriris la sveda eskadro, staras, atendas sian horon...

Petro prenis la lornon, fiksrigardis: en la golfo tre malproksime vidiĝis mastoj kaj jardoj de senmove starantaj ŝipoj de la eskadro de admiralo Nummers...

4. Fortreso sur la Lepora insulo

Dum tuta tiu tago en la rusa tendaro dormis ĉiuj — de arieraj soldatoj ĝis generaloj kaj feldmarŝalo Ŝeremetev mem. Nur gardistoj pasadis super kviete plaŭdantaj akvoj de Nevo,

oscedadis kaj interkriadis:

— Aŭsku-ultu!

— Ate-entu!

Kiam iĝis iom pli freŝe, kunvenis konsilio, en kiu al Petro kaj Menŝikov oni aljuĝis ordenojn de Sankta Andreo. Surmeti ordenajn signojn la konsilio ordonis al la plej aĝa kavaliro de ĉi ordeno Aleksio Teodoroviĉ Golovin. La caro antaŭ la momento de la ceremonio malfruis pro aferoj, la unua venis Menŝikov en brokaĵa kun perloj kaftano, en pufaj puntoj, prenis per la maldekstra mano la rubandon, per la dekstra — la ordenon kaj juvelŝtonojn; apenaŭ riverencinte, forturniĝis de Golovin. Tiu kunpremis la lipojn, balancis la kapon. En la tendon kun ŝultro antaŭen, hastante kaj ĝeniĝante, eniris Petro, akceptis en la grandan manon kaj la rubandon kaj la ordenon kun juvelaĵoj, riverencis al la konsilio. Lia vizaĝo en tiuj sekundoj estis infanece senhelpa, malfermita, feliĉa. Nikito Ivanoviĉ Repnin, elirinte el la tendo, svingis la tukon, tuj ektondris ĉiuj kanonoj — kaj la rusaj kaj la prenitaj de la svedoj...

Ankoraŭ ne eksilentis la kanonaj salvoj, kiam el la forĝejo de la urbo Nieno oni alportis la unuajn medalojn, stampitajn laŭ la ordono de Petro. Sur la medaloj eblis legi: «Neokazinta okazas». La soldatoj kaj oficiroj, partoprenintaj la kapton de «Astrild» kaj «Gedan», viciĝis apud betula arbareto — laŭlonge de malkruta, marĉa bordo de Nevo. Petro, hastante, strabante per la okuloj, kiel ĉiam dum solenaĵoj kaj ceremonioj, almetadis al ĉies brusto medalon; la soldato, aŭ serĝento, aŭ oficiro alpremadis la dekoracion per la polmo, kvazaŭ ĝi povus algluiĝi. Ĉio estis farata en silento, neniu sciis, kiel oni devas fari tiajn ceremoniojn. Rjabov same ricevis medalon, rigardis al

ĝi, metis en profundan poŝon...

Kiam Petro revenis en la tendon, Menŝikov, starante ĉe alta pupitro, ŝvitante kaj kolerante, estis skribanta leteron al Moskvo, almetante unu literon al alia:

«...sed sinjoro kapitano bonvolis iri en la maron, kaj mi estis ĉe li, kaj revenis ni ne sen feliĉo: du ŝipojn malamikajn kun standardoj, kaj kun kanonoj, kaj kun ĉiaj provizaĵoj ni prenis. Ĉi tage al mi estis donita honoraĵo — kavaliro. Post tio estu sanaj, miaj karegaj. Skribite en fortreso Nienŝanco — nun Ŝlotburgo».

Kaj li subskribis:

«Ŝluselburga kaj Ŝlotburga gubernatoro kaj kavaliro Aleksandro Menŝikov».

Lia vizaĝo ĉe tio estis kolera.

Petro rigardis en la leteron, demandis:

— Nu, pro kio do vi paŭtas, kara Saĉjo?

Menŝikov respondis kun raŭko en la gorĝo:

— Ili krevu nun, *Min Her*. Kiam la signoj sur min estis metataj — ili min apenaŭ ne voris per siaj okulaĉoj... Enviantoj, avaruloj, diabloj! Nun ili rememoru, kiel ili diris, ke mi per pirogoj kun leporaĵo komercis... Ekde nun kaj por eterne — forgesite!

— Forgesite, ĝis mi ne rememorigos! — malmilde diris Petro. — Kaj se mi rememorigos, Aleksandro Daniloviĉ, tiam iĝos tiel, ke eĉ komerci per pirogoj vi opinios feliĉo. Kara vi estas por mi, vi estas brava, sed iam...

Li svingis la manon, ne findiris. Amara esprimo glitis subite

en liaj okuloj, li ankoraŭ fiksrigardis al Menŝikov kaj kun mallaŭta angoro demandis:

— Kion vi pensas? Ĉu? Kion vi per via malbenita kapaĉo pensas, estu vi damnita?

— Mi? Ho Dio kaj sanktaj protektantoj! — kriis, paliĝante, Menŝikov. — Ja ne havas vi pli bonan...

Petro subite subridis nur per la buŝo kaj deiris.

Samloke la ŝtata konsilio en disputoj kaj insultoj determinis la lokon, sur kiu estu fortreso. Nienŝanco staris tro malproksime de la maro. Novan citadelon endis konstrui sur la Lepora insulo, kiu ĉe tri flankoj estas ĉirkaŭita de abundaj akvoj, kaj ĉe la kvara de trafluejo. Preter la Lepora en Nevon ne povis ekster pafoj trairi eĉ unu boato, ne dirante eĉ pri ŝipo. Ĉio ĉi estis bona, sed malbona estis tio, ke la Lepora insulo tuta konsistis el marĉo; oni diris, ke estas tie eĉ englutantaj marĉoj kaj ke seka pado sur ĉi pereiga loko ne troveblas. Oni diris ankaŭ, ke dum oftaj ĉi tie inundoj la tuta insulo subakviĝas.

Petro aŭskultis silente, frapetante la pipon al la tablo, pensis.

— Estu fortreso sur la Lepora! — finfine diris li. — Kaj estu ĉi tie urbo. Pro tiu bona komenco oni portos al ni nun malnovan hungaran vinon...

Sub tondrado de kanonoj ili drinkis je la kavaliroj de la ordeno de Sankta Andreo, je ĉiuj, dekoraciitaj per medalo «Neokazinta okazas», je la ŝtata konsilio, je gubernatoro kaj kavaliro Menŝikov, je Petro Aleksejeviĉ kaj aparte — je la nova rusa fortreso en la buŝo de rusa rivero Nevo...

En la sama nokto en sia malalta tendo Silvestro Petroviĉ skribis leteron al Maria Nikitiŝna en Arĥangelskon.

Nemalproksime, dolĉe ŝmacante, dormis Ivaĉjo, apud li suĉis la pipon Rjabov.

«Ĉi urbo — dume nomata Petropolo, — skribis Ievlev, — estas nur marĉaj bordoj kaj maloftaj vilaĝetoj, kaj loĝado por ni estos ne alie, ol en tera kavo, aŭ en domo, konstruita simile al branĉkabano. Sed se vi deziras — bonvenu, ĉar mi estas nomumita por servado al la loka Balta floto. Kun via trajno vi nepre devas preni...»

Li pensis iom, rigardis al Rjabov, vokis:

— Ivano Sabateiĉ!

La piloto strabis al Ievlev, elprenis la pipon el la buŝo...

— En Arĥangelskon mi skribas, al Maria Nikitiŝna, — diris Silvestro Petroviĉ, — en pripenso de ŝia veno ĉi tien. Ĉu ne iru ili kune — kun Taisja Antipovna kaj kun avinjo Eŭdoĥa. Ĉiel estos pli facile, ol unuope, kaj kun tempo en ĉi urbo ankaŭ via edzino estos. Ĉu mi prave diras?

— Jen urbo! — nedifinite eldiris la piloto. — Vere, urbo.

— Do, kiel? Ĉu mi skribu?

— Probable, skribu! — kvazaŭ heliĝante en la vizaĝo kaj brilante per la okuloj, diris Rjabov. — Iom post iom ni aranĝos vivon, hakos lignodomon. Kial do tiele vivi? Ivano Ivanoviĉ estas sen patrina prizorgo...

Li ree suĉis la estingiĝintan pipon kaj aldonis decide:

— Ŝi veturu! La domon ŝi vendos, same la bovinon, ĉi tie ni ne pereos. Skribu, Silvestro Petroviĉ, ke Ivano Sabateiĉ ordonis al sia edzino severe sen ajna prokrasto lian volon ĝuste plenumi...

— Ĉu severe? — kun rideto demandis Ievlev. — Ĉu mi ĝuste tiel skribu?

— Skribu: ordonis severe, — ne respondante al la rideto de Silvestro Petroviĉ, ripetis Rjabov. — Ja ŝi estas fiera ĉe mi... Alie ŝi veturos, sed sola, ja kiel ŝi povas — nenobela, kaj kun maljunulino? Multe malfacile estos...

Silvestro Petroviĉ prenis tranĉileton por akrigi plumon; ne rigardante al la piloto, petis:

— Vi pri tio pasinta, Ivano Sabateiĉ, ne pensu plu. Ĉio okazas... Estis ili bonaj amikinoj, kaj restos tiaj ankaŭ ĝis cent jaroj...

Rjabov subridis, suspiris, nenion respondis.

En blanka nokto, la okan de junio, Silvestro Petroviĉ kun Rjabov en boateto alnavigis al la malkruta marĉa bordo de la Lepora insulo. Ĉi tie sur palafitoj jam estis konstruita albordiĝejo, al kiu almetiĝis barkoj, ŝarĝitaj per grundo, alveturigita el malproksime laŭ akva vojo. De la albordiĝejo iris tabulaj padoj, laŭ ili vice laboruloj estis puŝantaj knaremajn ĉarumojn.

Zumadis damnita kularo.

Portistoj kun vizaĝoj, verdaj pro malsanoj, nesufiĉa nutrado, humideco, trenadis sablon, grundon, ŝotron — en bastomatoj, en dorsaj kornaj kestoj, en sakoj, en baskoj de kadukaj ĉemizoj. Ostaj viroj, tiuj, kiuj ĉi tie estis opiniataj fortikuloj, grimpinte sur podion, permane enbatadis palafitojn. Miloj da homoj surŝutadis la damnitan marĉon per ŝotro, brančetaĵo, ŝutadis sablon, ruladis trabojn. Kun avida ŝmacado la marĉo englutadis ĉion, kion liveradis barkoj, ĉaroj, homoj...

Monotone, egale zumadis segiloj. Akorde, intermite batadis forĝomarteloj. De tempo al tempo aŭdiĝadis insultado de brigadestroj, superrigardantoj, severaj vokoj de gardantaj soldatoj.

Al Silvestro Petroviĉ aliris Jegoro Rezen, tuta pikita de kularo, plendis, ke estas tro malfacile labori.

— Evidente, ne facile! — konsentis Ievlev.

— Mortas multaj. Nutraĵo estas malbona, oni tre multe malsanas je ventroj. Ĉi tie unu kuracisto, hundinido, vendas kuracan vinon kun macerita pinglaro, sed multekoste, ne eblas aĉeti: kvar rublojn por sitelo. Skorbuto homojn faligas...

— Jes, faligas! — konsentis Ievlev. — Ĉi tie skorbuto, en la maro Nummers. Ne foriras, ĵetis ankrojn kaj staras. Li havas nemalmultajn kanonojn. Ne deziras, ke ni eliru en la maron. Ni prenis kaptiton, pridemandis, li transdiris vortojn de sinjoro vicadmiralo Nummers. Sinjoro von Nummers deklaris al siaj matrosoj, ke la rusoj neniam estos en la maro. «Ili mortaĉu en siaj stepoj!» — tiel li esprimis, la sveda vicadmiralo... Nu, kaj ni sen maro ne vivos, jen kiel, Jegorĉjo!

Kaj Silvestro Petroviĉ karese metis la manon sur la ŝultron de Rezen. Tiu konsentis:

— Ne vivos!

Kaj demandis:

— Ĉu generalo Cronhjort de rivero Sestro ne foriris?

— Kaj generalo Cronhjort ne foriris, — respondis Silvestro Petroviĉ. — Ne foriros ili mem, Jegoro. Ilin ankoraŭ forpeli necesas. Jen bonan aferon sinjoro feldmarŝalo Ŝeremetev faris:

forpelis latronojn el Jamo kaj Koporjo, — glora venko de nia armeo. Kaj Cronhjort persistas. Kaj ankoraŭ oni preteratentis ĉi tie — stultuloj! — li atakis per kirasaj rajdistoj nian postenon en Laĥto, hakis ĉiujn morte...

Dum ili konversaciis, la ĉielo tute ruĝiĝis. La sangoruĝa grandega ronda suno aperis super la bela Nevo, libere kaj senobstakle rulanta siajn akvojn inter dezertaj marĉaj bordoj, sur kiuj tre malofte vidiĝis fumeto de homa loĝejo. Tamburoj batis ŝanĝon de skipo, homoj ekiris al branĉokabanoj — veki dormantojn, kuŝiĝi sur ankoraŭ varman, putran, humidan pajlon.

Kiam ili estis sidiĝantaj en la boateton, Rjabov demandis:

— Kia nomo estos por ĉi fortreso, Silvestro Petroviĉ?

— Kvazaŭ laŭ la nomoj de apostoloj Petro kaj Paŭlo, — respondis Ievlev. — Petropaŭla, ŝajne, fortreso. Mi aŭdis, ke tiel. Ni vivos — ni vidos...

Rjabov forte premis la remilojn, la boateto vigle glitis sur la kvieta rivero, la rudristo demandis:

— Kaj eble, Silvestro Petroviĉ, ni nun rigardu por ni lokon, por konstrui domon. Jen — sur la Bazila insulo. Kaj arbaro estas, kaj bestoj en la arbaro abundas, kaj ŝajne ion pli sekan eblas trovi...

Li vekis Ivaĉjon, ili ĵetis en la boateton hakilon, fosilon, tranĉilon kontraŭ bestoj kaj eknavigis al la Bazila. La suno jam staris alte, la insulo estis kvieta, nur birdoj interkriadis en juna betula foliaro.

Ili longe serĉis pli sekan lokon, por eliri sur la bordon, trovis; malsatiĝinte, ili manĝis biskoton, altrinkis per bongusta

Neva akvo.

— Kial do ni ĉi tien venis, paĉjo? — demandis Ivaĉjo.

— Domon konstrui necesas! — respondis Rjabov. — Ni loĝos ĉi tie. Kaj apude de Silvestro Petroviĉ palaco konstruiĝos kun tempopaso.

— Domon! Ha! — elreviĝinte prononcis Ivaĉjo. — Kiu do en arbaro konstruas? Ni revenus, paĉjo, en Arĥangelskon, jen urbego! Kaj Komerca korto, kaj kajoj, kaj alia korto, sed ĉi tie kio estas?

Rjabov subridis, diris mallonge:

— Ne mia, frato, volo!

Kaj metis per la hakilo noĉon sur maljuna pino. Silvestro Petroviĉ deiris je duoncento da paŝoj kaj same batis per la hakilo — unu fojon kaj duan...

Ĉapitro dek unua

Ĉe marĉoj, baroj kaj de l' malamik' perturb'
Vend- kaj juĝ-lokoj, trupoj, flot' — kaj pretas urb'.
Lomonosov

1. Flota markadeto

Jam vespere Taisja knedis buteran paston por pirogoj, kaj longe antaŭ mateniĝo ekhejtis la fornon kaj vekis la piloton, nur nokte revenintan el Kronŝloto[155].

Ivano Sabateiĉ, kulpe kaj samtempe severe tusetante, etendis la manon por la malnovaj, kutime eluzitaj fiŝistaj botoj, sed Taisja ordonis hodiaŭ vesti sin per la plej bona, kaj Rjabov devis elpreni el la kofro ŝuojn kun bukoj, kamizolon kun dudek kvar arĝentaj butonetoj kaj kaftanon kun broditaj sur la maniko stirrado kaj kompaso — speciala signo, kiun devis porti la unua piloto de la Rusia ŝipa kaj mara floto.

— Eble, pli poste mi la ornatojn surmetu? — demandis Rjabov. — La liturgio, mi pensas, ne tuj komenciĝos?

— Ĉu ĉe li vi vin vestos? — demandis responde Taisja. — Iuj kadetoj jam hieraŭ matene venis...

Ŝi silentis iom kaj suspiris:

— Nur la glacio ne ekmoviĝu. Mi eliris — rigardis: ŝvelis la rivero... Kion ni tiam faros?

— Dum du jaroj ni atendis, ankoraŭ du semajnojn atendos!

---

155 Kronŝloto (de germana *Kronschlot* — Krona kastelo) — fuorto sude de Kronŝtadto sur insulo Kotlino apud Sankt-Peterburgo *(trad.)*

— diris la piloto. — Ne pereos la knabo. En la Admiraleja parto li havas amikojn, kaj en la Fanda[156]. Li povos sin nutri...

Li ankoraŭ foje severe tusis kaj komencis enbati la piedojn en la ŝuojn. Pro nova piedvesto li ĉiam malbonfartis, speciale li ne ŝatis tiujn platajn, knaremajn kaj malmolajn ŝuojn, kiujn li devis porti ĉe ĉiaj ceremonioj. Ankaŭ kun ŝtrumpoj li multe suferis, ili ĉiam glitadis malsupren de la kruroj, ilin necesis levi kaj per specialaj agrafoj kroĉi al ŝelkoj.

— Jen, damnita liturgio! — grumblis li, pasumante en la dormoĉambreto, kies muroj estis dense kovritaj per pendantaj garboj de sekaj herboj: Taisja heredis de forpasinta avinjo Eŭdoĥa ties scipovon kuraci per herboj kaj ŝmiraĵoj kaj ne sen sukceso kuracadis malsanajn maristojn sur la bordo de Nevo per la samaj rimedoj, per kiuj kuracadis avinjo Eŭdoĥa sur la fora Dvino. — Jen, embaraso kun tiuj ŝuoj, kaj bukoj, kaj ŝtrumpoj! — grumblis la rudristo, detenante sin de pli krudaj vortoj. — Do mi irados dum tuta tago kiel transmara plumpulo...

Ne surmetante la kamizolon kaj kaftanon, li razis sin antaŭ malgranda ŝtala speguleto, lavis sin kaj ekstaris kiel fosto en la pordo, atendante matenmanĝon. Sed estis nenia matenmanĝo, kaj Taisja kvazaŭ tute ne rimarkadis la edzon: alte kuspinte la baskon kaj montrante siajn belajn, sunbrunajn kaj facilajn krurojn, ŝi per betula balailo, laŭ Dvina kutimo, skrapadis la nefarbitan plankon, frotadis ĝin per sablo kaj brogadis per bolakvo el gispoto. Ĉio ĉi tie en la kuirĉambro estis renversita,

156 Admiraleja parto (Адмиралтейская сторона) — historia distrikto de Sankt-Peterburgo ĉirkaŭ la Admiralejo. Fanda parto (Литейная сторона) — historia distrikto en Sankt-Peterburgo; la nomo aperis pro Fanda kaj kanona korto, kiu estis fondita tie *(trad.)*

kaj al Ivano Sabateiĉ restis nenio alia, ol ankoraŭ foje demande tusi kaj eliri ekster la domon, sur benkon por tempopaso.

— Ĉu akvon porti? — demandis li, surmetante peltjakon.

— Mi alportis jam! — respondis Taisja per tiu voĉo, per kiu respondas ĉiuj edzinoj en okazoj de tiaj hejmaj urĝaj laboroj. — Vi povus nur morgaŭ rememori pri akvo! Kaj vestu vin pli varme, Sabateiĉ, ankoraŭ ne estas somero!

Ŝi komencis nomi lin Sabateiĉ antaŭ nelonge, kaj tio iomete afliktadis Rjabov-on.

— Sabateiĉ! — diris li el la vestiblo. — Jen elpensis! Ĉu mi estas maljuna?

Ŝi turniĝis, ekrigardis al li per siaj ĉiam varmegaj okuloj kaj kun tiu rideto, pro kiu ĝis nun haltadis lia koro, diris:

— Sed ja ne juna, Ivaĉjo, ne tia jam, kiam vi min ŝtele edzinigis. Kaj kiel do mi vin, tian falkon en pasamentoj, nomos Ivano? Vi forpelos min el la domo — kien mi iros... Montru do vin en lumo!

Li paŝis antaŭen kun la peltjako sur unu ŝultro kaj, antaŭsentante insidon, ĝenite kaj pete ekrigardis al Taisja. Ŝi longe fiksrigardis lin, tenante en la mano la balailon, peze spirante pro la laboro, ŝiaj okuloj mallarĝiĝis, kaj estis videble, ke ŝi apenaŭ retenas sin, por ne ekridegi.

— Nu kion? — preskaŭ ofendite demandis li. — Kio estas ridinda?

— Jen mi min krucosignos! Jen, je Dio, — haste, por findiri ne ekridinte, sed tamen ridante, diris ŝi. — Antaŭ nelonge oni generalon sepultis, ĉu el katolikoj... Nu, kaj lia ĉerko... Je Dio,

Ivaĉjo, ĝuste kiel via uniformo! Kaj kun pasamento! Kaj arĝento sur ĝi...

Li, rigardante al Taisja, same komencis subridi, samtempe kolerante. Kaj al ŝi pro la rido aperis larmoj sur la okuloj, ŝi svingadis la balailon kaj diris:

— Ho, Sabateiĉ! Nu kiu ĝin por vi elpensis, ĉi uniformon. Kara vi mia, por kio ĝi al vi necesas...

— Jen mi batos vin per la balailo! — diris li, retenante sin, por ne ridi. — Trovis ridindaĵon! Mem diras: surmetu, kaj mem — ridas!

Kaj kuntirante la brovojn kaj ridetante en la sama tempo, li eliris el la vestiblo, danke kaj feliĉe pensante pri Taisja, kun kiu ili kune atendos nun ankaŭ maljunecon...

Sur la benko apud la pilota domo sidis tute kaduka, sendenta, blankhara kiel norda urso finno-fiŝisto, ĝuste tiu fiŝista starosto, kiu antaŭ multaj jaroj diris al Petro, ke li, la rusa caro, eĉ kompare kun la fiŝista starosto, same havas nemalgrandan postenon.

— Saluton, avĉjo Ejno! — diris Rjabov. — Kial en la domon vi ne eniras?

— Mi riiposas! — diris la maljunulo. — Lacizis.

Kaj, palpebruminte per la palpebroj sen okulharoj, li kun signifo prononcis:

— Saaluton je kvar ŭeentoj!

— Jen, ellernis! — diris Rjabov. — Kiom da tempo lernis?

La finno pensis, komencis fleksi la fingrojn, prononcis severe:

— Sep jarojn.

Kaj metis en la buŝon peceton de maĉtabako. Rjabov ekfumis, kaj ambaŭ komencis rigardi al la ŝvelinta, en bluaj flustrioj, en makuloj de kota, degelanta neĝo — Nevo.

— Ĉu baldaŭ la glacio ekmoviĝos? — demandis la piloto.

— Paaldaŭ.

— Kiam?

— Hotiaŭ. Aŭ morkaŭ. Tute paaldaŭ.

— Jen, damnita knabo! — en kolero diris Rjabov. — Restos sur la transa bordo...

— Ne ŭeenis la fiilo?

— Ĝuste, ke ne venis.

— Ne ŭeenis. Kaj mi fiiŝon alportis. Ino ŭia ordoniss...

— Ĉu Taisja Antipovna?

— Ordoniss poona fiiŝo alporti. Mi alportiss...

Ili ree silentis. Rjabov rigardis al la konstruaĵoj de la Admiralejo, apud kiuj sur ŝipglitejoj staris nova ŝipo.

— «Laatokka»! — pronocis poste avo Ejno.

— Ne, frato, ne «Ladogo»!

— «Laatokka»! — obstine ripetis la maljunulo.

— «Ladogon» oni ankoraŭ kalfatras! — diris la piloto. — Mi antaŭ hieraŭ tie estis. Kaj ĉi ŝipo nomiĝas «Noteburgo».

La finno por longe enpensiĝis. Ambaŭ silente rigardis al Nevo, de kiu, kiel ŝajnis al Rjabov, venadis susurado kaj krakado. Sed tio nur ŝajnis — la glacio ankoraŭ tenis sin. Eĉ

piedirantoj kun timeto, sed tamen vadis, kiel nigraj muŝoj, de la Admiralejo al la Petropaŭla fortreso, apud kiu situis bazaro, de la Bazila insulo al Nova Holando[157], kie loĝis fremdlandaj ŝipmajstroj. Sed sledoj sur la glacio de Nevo jam ne videblis, kaj brutaron oni ne plu pelis al la Mara bazaro, kiu estis kontraŭ la fortreso sur la alia flanko de Nevo.

— Foorte iiross klaasio! — diris avo Ejno. — Kranta estos klaasiflosato...

Rjabov ne respondis, per mallarĝaj okuloj rigardis al konstruata palaco de general-admiralo Teodoro Matejeviĉ Apraksin, al la pinto de la Admiralejo, apud kiu linie viciĝis tri- kaj ses-fenestraj dometoj sub tegolaj, ŝindaj kaj pajlaj tegmentoj. Tie, en tiuj domoj, estis donita loĝejo kaj por ministroj, kaj por oficiroj, kaj por kurieroj, kaj por generaloj; tie, en unu el tiuj domoj, okaze de glaciflosado povis resti flota markadeto Ivano Ivanoviĉ Rjabov...

— Nu, ĉu ne diabla knabo! — finfine diris la piloto. — Aliaj jam kiam el Moskvo venis, sed por li tie mapoj Merkatoraj eknecesis. Do jen, atendas li, satano, ĉi mapojn...

— Tia ja eestass seervo! — prononcis avo Ejno. — Maara seervo.

Rjabov ne respondis; rigardis samtien, kien rigardis la maljunulo, — al la mara standardo, levita sur la cara bastiono de la Petropaŭla fortreso pro dimanĉa tago. La flava tuko flirtis sub malvarma printempa vento kaj montris la dukapan aglon, kiu tenas en la piedoj mapojn de kvar maroj: Balta, Blanka, Kaspia kaj Azova...

---

157 Nova Holando — insulo en la Admiraleja distrikto de Sankt-Peterburgo *(trad.)*

— Tiapla knapo, tiapla knapo, — nehaste ripetis avo Ejno. — Rusa knapo estas tia knapo. En nia vilazo tie ŝe maaro unu diiriss fapelon: viiviss ni tie, viiviss — malpone viiviss. Toomon konstruass — zi en maarso troonass. Ankoraŭ alian toomon konstruass — same en maarso troonas. Jen veeniss rusa knapo. Kranta knapo, zis la sielo mem — tia knapo. Preeniss sian manon...

Ejno per siaj nodplenaj fingroj malfleksis la pugnon de Rjabov — montris, kiel la rusa knabo tenas la polmon.

— Jen tiele. Kaj sur la mano urbon konstruiss. Tutan urbon: toomojn, atmiralejon, taveernojn, poŝtejon, pulvan koorton, foortresson, la Nevan straton. Kaj kiam konstruiss — meetis tutan tiun urbon tuj sur la maarson, krantan urbon la maarso ne povis gluti. Ne troonis la urbo en la maarso. Restis. Urbo sin teenass, unu toomo ne tenas. Vi riitas?

— Mi ne ridas! — respondis Rjabov. — Kial ridi pri tio. Bona fabelo.

— Ne riitu, — diris Ejno. — Saza fapelo.

— Nu, ni iru, avĉjo, — proponis la piloto, — malvarmiĝos ni ĉi tie en frosto sidi. Eble, mia mastrino jam ordigis la domon.

Ejno prenis sian korbon kun fiŝo, Rjabov larĝe malfermis antaŭ li la barilpordeton. En la domo staris bona odoro de kuracaj herboj, de ĵus lavitaj plankoj, de varmaj pirogoj. Taisja vestis sin, nur la harojn ne ordigis — la densa, longa harligo rekte kuŝis sur la dorso kaj faris ŝin simila al junulino, kvazaŭ revenis tiuj malproksimaj tempoj en Muskoj...

— Hotiaŭ ŭeenoss ŭia knapo! — diris al ŝi avo Ejno.

— Ja ni jam longe atendas, avĉjo! — iel pli laŭte, ol kutime, kun angoro en la voĉo diris Taisja. — Dum du jaroj mi lin ne vidis! Li estas jam markadeto; homoj diras: inteligenta knabo; malbonan pri li mi ne aŭdis, sed sopiro min elturmentis...

Kaj ŝi metis sur la tablon la tagmanĝon: bovlon da kaĉo, panon, kruĉon da lakto, kaj mem komencis ordigi la fiŝon.

— Vi mem kial ne eksidas? — demandis la piloto.

Ŝi suspiris, ne respondis.

— Se ponton starigi trans Nevon, — iom poste diris Rjabov. — Tio estus bona afero. Alie kiam glaciflosado, aŭ glaciiĝo — el la insulo ne eblas eliri.

— Ponton? — demandis avo Ejno.

— Ponton.

— Ne eplas ponton! — diris la finno. — Tia ponto ne eksistass.

Li finmanĝis la kaĉon, trinkis lakton kaj, riverencinte al la mastrino, ekiris al la pordo. Taisja vokis lin, petis ne neglekti regalon, kiam la filo venos. Avo Ejno dankis, la piloto akompanis lin ĝis la barilpordeto kaj ree staris iom, rigardante al Nevo kaj turmentiĝante pro atendo. Poste li trairis laŭlonge de la malkruta bordo, kovrita per poreca neĝo, el sub kiuj jam ie videblis velka pasintjara herbo, — al la bieno de subadmiralo Ievlev. Ĉi tie estis malfermita la pordego kaj en la korto estis klopodanta kun malpeza sledo de Ievlev la koĉero — ruza viro Eliezero.

— Ĉu vi atendas? — demandis li, rimarkinte Rjabov-on.

— Tiel... pasumas. Kion vi kun la sledo faras?

— Je necesas ĝin en la kaleŝejon meti. Finiĝis la sleda tempo...

Eliezero aliris pli proksime al la pordego kaj, farinte enigman mienon, nelaŭte ekparolis:

— Vi, Ivano Sabateiĉ, atendas, kaj ĉe ni nun iu en la bieno tute la okulojn ne fermis...

La piloto ŝultrolevis, kvazaŭ dirante, ke lin tiu cirkonstanco tute ne interesas.

— Dum la tuta nokto, ĉu vi kredas, dum la tuta tiel ĉe la fenestro trasidis nia Irena Silvestrovna. En peltjakon patran sin envolvis, en ŝalon, kaj al la glacio rigardas. Estas bone almenaŭ, ke la admirala edzino ne eksciis...

— Sed vi estas klaĉulo, Eliezero! — kolere diris Rjabov. — Kvazaŭ oldulinaĉo. Tuj videblas, ke vi ne servis kiel soldato, blato transforna...

Eliezero ne ofendiĝis, sed ekridis:

— Mi estu blato, sed por vi estas flate! De kampula deveno, sed al admirala filino edziĝi. Se nur benus Maria Nikitiŝna, sed, vidu, estas dubinde...

Rjabov kraĉis kaj ekpaŝis for, reen al sia domo. Tie li staris iomete, por malvarmiĝi de kolero, eniris en la kuirejon kaj eksidis sur la benko, apud Taisja, kiu, kunmetinte la manojn sur la brusto, rigardis rekte antaŭ si kaj pensis pri io.

— Mi pensas, hodiaŭ vespere li nepre estos! — diris la piloto.

Ŝi ne respondis. Li metis sian grandan, trapeĉitan, krudan pro laboro manon sur ŝian maldikan pojnon, kaj per la alia

mano brakumis ŝian ŝultron. Ŝi senvorte kaj danke alpremiĝis al li, kaj li, subridinte, mallaŭte ekparolis:

— Nun kio, Tainjo! Nun ni ankoraŭ ne sur forno avo kun avino, ankoraŭ ni mem en la maron iradas, sed post tempopaso, kiam la sola afero restos por ni ambaŭ — atendi, tiam vere malgaje estos...

Taisja iom deiĝis de li, ekrigardis kvazaŭ kun miro, balancis la kapon:

— Ĉu avo kaj avino? Ho, Ivano Sabateiĉ, kaj kiam vi ĉe mi saĝiĝos? Ŝajne, ne juna estas viro, ŝajne, ĉion vidis, por iu alia por tri vivoj sufiĉus, sed per la menso vi plu estas kiel infano. Avo kaj avino! Vi rememoru, ĉu ne dum tuta mia vivo mi atendadis vin? Ĉu okazis en nia vivo almenaŭ unu jaro trankvila? Kaj tuj kiam Ivaĉjo sur la proprajn piedojn ekstaris — li same fuĝis kun vi kiel tamburisto, kaj ankaŭ lin mi atendis. Kaj nun vi en la maro, li en la navigista lernejo, estos ankaŭ li maristo. Proksima estas tiu horo, ke vi ambaŭ de mi foriros kaj ree mi sur la bordo atendos...

Li pensis, ke ŝi ekploros, sed ŝiaj okuloj estis sekaj kaj nur la pojno tremis en lia mano.

— Ĉu mi nun malproksime iras? — demandis li, konsolante Taisja-n. — Mi nun eĉ ne maristo estas tute, Tainjo. Nura amuzo...

— Amuzo? — demandis ŝi. — Bona amuzo! Kiam mi kun avinjo Eŭdoĥa ĉi tien en vian urbon Piterburgon venis — tiam komenciĝis. Mi ja memoras, se vi forgesis, ĉion memoras — kaj kiel vi ĉe Viborgo en glacioj fiksiĝis, kaj kiel viajn galerojn fluo reen en la maron portis. Vi silentis, aliaj rakontis. Kaj mi

ja mem pri la maro aŭdis sufiĉe, ne trans forno mi de la maro kaŝiĝis, kaj la patro kiel rudristo iradis, kaj vi, kara karulo, ne de piedira ordo soldato estas. Kaj kvankam nur iomete, sed iujn ŝipojn mi mem kondukis... Amuzo!

Ŝi firme alpremiĝis al lia ŝultro, kvazaŭ laciĝinte kaj petante, ke li ne plu babilu galimation. Tiel unu ĉe la alia, pensante siajn pensojn, sidis ili longe. Taisja, eble, ne atentis, aŭ eble, ne aŭdis, kiel trifoje, post malsamaj tempaj intervaloj, tondris de la supra fortikaĵo de la Petropaŭla fortreso kanono, avertante pri tio, ke la glacio de Nevo tuj ekmoviĝos kaj sur la glacio sub minaco de puno per skurĝo iri ne plu estas permesate. «Ne ĝisatendis! — kun angoro pensis la piloto. — Nun ne baldaŭ!» Li singarde demetis la malvastajn ŝuojn, leviĝis, detiris la uniforman paradan kaftanon, surmetis ĵerzon, la malnovajn moligitajn botojn. Li tre deziris rakonti al Taisja tion, kion aŭdis li hodiaŭ de Eliezero — la koĉero de Ievlev. Tio, probable, ĝojigus ŝin, sed ne decis por viro enmiksiĝi en tiajn aferojn, kaj li nur severe tusetadis kaj fumadis sian pipon.

En angoro, en atendo, nekomprenebla por tiuj, kiuj neniam atendis siajn plenaĝajn infanojn, pasis tagmezo, komenciĝis krepusko. Rjabov, ne elteninte silenton kaj la atendantan rigardon de Taisja, demetis de la breto dikan, donacitan de Silvestro Petroviĉ karafeton; verŝis por si herban likvoron, almanĝis per fumo; verŝis ankoraŭ; poste, ofendiĝinte pro la edzino, diris:

— Meritus vi vergadon, markadeto, sed ne estas kiu vergos.

— Pro kio do lin vergi?

— Ja pro tio!

Pli poste, susurante per la peltmantelo, kovrita per silko, venis Maria Nikitiŝna, miris:

— Ĉu vi ĝis nun ne tagmanĝis? Sed jam la kanono pafis — ne plu iri sur la glacio. Estas feliĉe, ke Silvestro Petroviĉ anticipe el la Admiraleja kolegio revenis...

— Aŭdis mi la kanonon, — mallaŭte respondis Taisja.

Rjabov ĵetis rapidan rigardon al la edzino: ŝi aŭdis — kaj ne montris. Kaj Maria Nikitiŝna tiutempe estis rakontanta, ke ambaŭ ŝiaj filinoj atendas Ivanon Ivanoviĉ-on kun ĝojo, ne vidis tiom longe, kaj la infaneco, ĝi longe memoriĝas...

«Certe, infaneco!» — kun subrido pensis la piloto, ree surmetis la peltjakon kaj eliris al la bordo — rigardi, kiel ekiras glacio sur Nevo. Granda blanka luno pendis super Peterburgo, kaj en ĝia malklara lumo videblis malrapida kaj malfacila moviĝo de glacipecoj sur la larĝa rivero. Dum la nuna tago jam kreiĝis glacitruoj, nigra akvo en multaj lokoj eliĝis supren, sur glacion, la rivero susuris, siblis, glacipecoj frotis unu la alian, jen renversiĝante, jen ekstarante vertikale, jen falegante en akvajn trafluejojn. Kaj sur la alia flanko videblis rajdaj gardantoj, veturantaj laŭlonge de la bordo, kaj iam subite aŭdiĝis laŭta muĝo de klariono — la gardantoj sciigadis malfruintajn piedirantojn pri tio, ke ili nun devas nokti ne hejme, sed sur la alia flanko de Nevo, kie ilin kaptis la glaciflosado.

Tiel Rjabov staris dum horo: aŭdeblis, kiel sur la ligna sonorilejo de la Isaaka preĝejo nokta gardisto sonorigis la naŭan horon. Kaj kune kun la horloĝa sonorado la piloto ekvidis, kiel malgranda, fora, apenaŭ distingebla homa figureto nemalproksime de la Admiralejo transsaltis trafluejon kaj lerte

ekkuris sur ŝanceliĝantaj kaj moviĝantaj glacipecoj.

La koro de Rjabov haltis por momento, sed li glutis malvarman, noktan aeron kaj, mallarĝiginte siajn akrevidajn, malmildajn okulojn, fiksrigardis al la homo, kiu facile, kun longa stango en la manoj, estis kuranta trans Nevon al la Bazila insulo. Ju pli da tempo pasadis, des pli klare videblis, kiel tiu temerara homo subite komencas ĵetiĝi sur rando de glacitruo, cerbumante, kiel li pli bone saltu, kiel li saltas, apoginte sin per la stango, kaj kiel ree kuras. Kaj, forgesinte pri la teruro, kiu trafis lin komence, la piloto nun, kvankam kun batanta koro, sed jam nun admire rigardis al tiu temerara viro, nur ĝoje miris pri lia lerteco, rapideco kaj aŭdaco. «Ne, tia ne dronos, — pensis li, — tian eĉ diablo ne prenos! En kio li estas vestita? Ĉu ne en trikorna ĉapelo? Ŝajne, vere en trikorna, kaj ankoraŭ kun plumaĵo?»

Subite ĉesinte pensi racie, li faris paŝon al la glacio, ekvidis antaŭ si larĝan strion de akvo, saltis... Glacio ĉi tie ĉe la bordo estis ankoraŭ firma kaj densa, sed iom pli malproksime estis finiĝanta per kontinua kaj rapida trafluejo. Kaj la homo kun la stango en la mano plu kuris kaj kuris, kaj nun Rjabov klare vidis, ke tiu homo estas maristo kaj lia filo Ivaĉjo, markadeto. Li ion kriis, sed Ivaĉjo nenion aŭdis pro bruo de frotiĝantaj glacipecoj kaj ne povis aŭdi, ĉar ĉio ĉirkaŭe estis moviĝanta, bolanta kaj krakanta. Nun la markadeto estis tute proksime apud la bordo. La piloto vidis, kiel lastfoje, apoginte sin per la stango, li saltis, kiel en luna lumo ekbrilis akvaj ŝprucoj kaj kiel li trafis sur la bordon.

— Ivaĉjo-o! Diablo! — ankoraŭ foje kriis la piloto kaj mem ekiris al la bordo, mirinte, ke la markadeto abrupte turnis sin en

la direkto, kontraŭa de la gepatra domo. — Ivaĉjo-o!

Sed tiu ree nenion aŭdis, kaj Rjabov nur ekvidis lin, kiam mem, elirinte sur firmaĵon, ekrigardis al la bieno de Ievlev. Tie, el la pordego, tuta prilumita de egala luna lumo, ne kuris, sed kvazaŭ flugis kun etenditaj antaŭen manoj maldika, alta, kun retroklinita kapo Ievlev-a Irenjo, Irena Silvestrovna, la admirala filino. Kaj senmova, kvazaŭ rigidiĝinta, staris sub malavara luna lumo la markadeto Rjabov Ivano filo de Ivano...

La piloto viŝis ŝviton, suspiris, forturniĝis, kuntiris la brovojn. Amare por li iĝis por momento, sed tuj kvazaŭ fulmo prilumis la malproksimegan humidan kaj pluvan vesperon, kiam kuris li tra Arĥangelsko al Muskoj kun la obstine krianta birdo en la manoj, kun la damnita kreaĵo, akirita en fremdlanda ŝipo, kun la aĉa diablino, kiu ĝis sango ŝiris liajn manojn, — kaj la amaro forpasis. Kaj alion rememoris li, tion, pro kio li nur movis la ŝultrojn, suspiris kaj ekiris al sia domo, penante ne retrorigardi al la Ievlev-a pordego...

Malferminte la pordon, li ekrigardis al Maria Nikitiŝna, al Taisja, silentis iom, poste prononcis laŭte, per plena voĉo:

— Kial vi malriĉe vivas? Unu kandelo, kaj tiu jam finiĝas. Sed mi tiel pensas, ke baldaŭ venos al ni kara gasto. Primetu, primetu, Antipovna, la tablotukon, alie vi malfruos la filon bone renkonti...

Li elbatis fajron, bruligis ĉiujn kandelojn en kupra kandelingo, super la ĵerzo surmetis la kaftanon kaj diris kun viva kaj ruza subrido:

— Kvankam al ĉerko ĉi kaftano similas, sed tian neniu generalo havas. La unua piloto ja estas mi sola, ĉu vere, Maria

Nikitiŝna?

— Vere, Ivano Sabateiĉ, vere! — kun kaŝita maltrankvilo diris Maria Nikitiŝna. — Sed mi neniel povas kompreni...

— Ja kion ĉi tie kompreni! — kun la sama tentata ruzeco prononcis Rjabov. — Ĉi tie estas nenio por kompreni. Jen li paŝas — iu markadeto, Ivano Ivanoviĉ...

La pordo malfermiĝis, Taisja paŝis antaŭen, svingis la manojn, kun rapide paliĝinta vizaĝo alpremiĝis al la filo. Li brakumis ŝin, per tremerinta buŝo prononcis strangajn vortojn:

— Pardonu, panjo... mi...

Kaj ne findiris, ekvidinte Marian Nikitiŝna-n. Al ŝi li riverencis, sed ne tro malalte, kun la patro trifoje kisiĝis. Liaj verdaj okuloj rigardis al ĉiuj kun stranga kaj maltrankvila esprimo de feliĉa obstino, kaj dum longa tempo al ĉiuj ŝajnis, ke li nenion bone vidas kaj kvazaŭ ne komprenas, ke li revenis hejmen. Nur la piloto sola divenis, kio okazas en la animo de la filo: li sciis tiun senton de facileco kaj kredo je si, je siaj fortoj, kiu venas post embarasoj, similaj al tiu, en kiu ĵus estis Ivano Ivanoviĉ...

— Sed kiel do vi... la glacio ja ekmoviĝis? — demandis subite Taisja.

— La glacio ankoraŭ estas firma, panjo! — respondis Ivaĉjo kaj etendis la manon al pirogo.

Li estis malsata kaj manĝis ĉion, kion oni alŝovadis al li, drinkis herban likvoron, pipran vodkon, rekrementovinon, ankoraŭ likvoron. Foje li komencadis diri ion detale, poste kvazaŭ enpensiĝadis, lia rigardo iĝadis distrita, poste ree obstina...

— Sed ĉu vi ne ekmalsanis, Ivaĉjo? — demandis Taisja.

— Ne, panjo, tute ne! — respondis li, feliĉe kaj sensence rigardante al ŝi. — Tute ne, panjo, kia povas esti malsano... Ni veturis... kaj jen alveturis... Vidu — mi estas hejme.

Iom pli poste venis Silvestro Petroviĉ kun kolonelo inĝeniero Rezen. Ievlev de la sojlo demandis:

— Nu, sinjoro markadeto Rjabov, kie vi estas?

Ivano Ivanoviĉ ekstaris, iomete ruĝiĝis, etendiĝis antaŭ la admiralo. Ievlev atente fiksrigardis lin per siaj helbluaj, ĉiam severaj okuloj, demandis kun sia kutima abrupteco:

— Kiam en la maron?

— Kiam oni ordonos, sinjoro subadmiralo.

— Kien vi deziras? Ĉu en la galeran aŭ en la ŝipan?

— En la ŝipan, sinjoro subadmiralo.

— Do, al Apraksin, al la general-admiralo. Li vin, mi pensas, memoras, kiel vi al Petro Aleksejeviĉ fabelon rakontis: «kaj kisos min en la buŝon dolĉan...» Nu, eksidu, markadeto...

Rjabov verŝis por Ievlev likvoron, li eltrinkis senhaste, rigardante jen al la piloto, jen al la markadeto, kvazaŭ serĉante en ili ion tian, kio estis konata nur al li sola; poste li subite tuj trovis en ambaŭ tiun specialan, Rjabov-an esprimon de moka persisto kaj fiero kaj, tuj trankviliĝinte, komencis manĝi. Kaj manĝinte pecon de fiŝo, li demandis de Maria Nikitiŝna:

— La fraŭlinoj do kie estas, patrino? Mi pensas, ke ankaŭ por ili ne estas peko ĉi markadeton, ilian bonan infanan amikon, jam nun ekvidi...

Maria Nikitiŝna iomete maltrankviliĝis: ĉu decas en ĉi malfrua horo, ĉu estos bone, ĉu konvenas por la gemastroj mem. Ievlev potence interrompis:

— Decas, la horo ne estas malfrua, al la gemastroj konvenas...

La fraŭlinoj venis ambaŭ tuj, unu en verda tafta ronda robo, la alia en rozkolora. La piloto, ne deŝirante la okulojn, rigardis al sia favoratino, al la pli juna — Irenjo. Ivaĉjo riverencis malalte al Venjo, same malalte al Irena kaj, renkontiĝinte kun ŝi per la okuloj, mallevis la okulharojn, kvazaŭ ne povis rigardi al ŝi. Irena, genufleksante laŭ la nova maniero, iĝis pala, sed venkinte sin, levis la kapon kaj fiere ĉirkaŭrigardis ĉiujn. En tiu momento Silvestro Petroviĉ iĝis apud ŝi. Brakuminte ŝin je la ŝultroj, li diris al la markadeto:

— Mi petas ami kaj estimi, Ivano Ivanoviĉ, jen mia pli juna, Irena Silvestrovna, kaj ĉi pli maljuna estas Vera Silvestrovna. Mi tion diras, sinjoro markadeto, por rememorigi, probable pro malproksima tempo vi ne distingos nun viajn iamajn amikinojn...

— Mi distingos, sinjoro subadmiralo! — firme kaj trankvile respondis Ivano Ivanoviĉ.

2. Nova nomumiĝo

Tuj kiam mateniĝis, Ievlev sendis por la markadeto servosoldaton. Nevo dum tiuj tagoj preskaŭ tute puriĝis, nur raraj malhelaj glacipecoj malrapide flosis al la buŝo. La tago estis malserena, griza, humida. Silvestro Petroviĉ same estis

malserena, sidante ĉe la rudro de la boato. Apud la enirejo en la Admiralejan kolegion Ievlev diris:

— Iru rekte al la general-admiralo. Li vin memoras kaj akceptos. Se li demandos, kian vi havas deziron, diru senkaŝe: mi havas deziron servi sub komando de sinjoro kapitan-komodoro Luko Aleksandroviĉ Kalmukov. Ĉi oficiro estas saĝa, elstare kuraĝa, ĉe li vi iĝos bona oficiro. Ĉu vi memorfiksis?

— Mi memorfiksis! — respondis la markadeto.

— Nu, iru kun Dio!

Ili disiĝis en la vestiblo de la kolegio.

General-admiralo de la Rusia ŝipa floto Teodoro Matejeviĉ Apraksin vere akceptis la markadeton tuj. Li sidis sola en malalta, negranda ĉambro, ĉirkaŭpendigita per maraj mapoj, per fajrostango dispecigadis brulaĵojn en kameno. Sur malalta tableto apud fotelo fumis granda ŝtona taso kun kafo. Apude kuŝis pipo kaj tabaksaketo.

— Tiele! — eldiris la general-admiralo, elaŭskultinte Ivanon Ivanoviĉ-on. — Tiele...

Kaj, pli dense ferminte sur la brusto malnovan leporan peltjaketon, trinkis unu gluton el la taso.

La markadeto silentis. Aŭdeblis, kiel trans la muro iu draste insultas per pipraj vortoj.

— Kaj ĉu al li vi ne deziras? — demandis Teodoro Matejeviĉ, kapmontrinte al la muro. — Bona maristo. Admiralo Botsis, komandas la galeran floton. Pli bonan instruiston ne eblas trovi...

Ivano Ivanoviĉ ne respondis, kvankam pri Botsis li aŭdis multe da bona. Li deziris tamen iri sur ŝipon, sed ne sur galeron.

— Kial vi silentas? — demandis Apraksin.

La markadeto tusis kaj diris, rekte kaj sentime rigardante en la okulojn de Apraksin, ke la general-admiralo pardonu lin, sed en la navigista lernejo li vidis tiom da malbono de instruistoj-fremdlandanoj, ke servi li dezirus sub estrado de rusa oficiro.

— Tiel, tiel! — ree prononcis Apraksin. — Tiel.

Kaj li komencis longe, kun intereso pririgardi la markadeton. Poste ordonis:

— Eksidu pli proksime.

Li pensis iom kaj ekparolis:

— Estas fremdlandanoj kaj fremdlandanoj. Ĉi admiralo Botsis estas la sola el fremdlandanoj, kiu, dungiĝante al la rusa servo, ne demandis, kian soldon li ricevos. Kaj ne nur tuj ne demandis, sed poste longe pri mono ne demandadis, ĝis tute elspezis sian monon, tiom, ke eĉ por pano ne sufiĉis. Nur tiam li rememoris, kaj, caran soldon ricevinte, ne kalkulis ĝin, sed ŝutis en skatolon, kaj ne rememoradis plu, ĝis denove elspezis ĉion. Mankas al li tempo por kalkuli monon, malsame de iuj aliaj...

La vizaĝo de Apraksin mildiĝis, li longe suspiris, skuis la kapon, diris kun malgajo:

— Ankoraŭ estis tia homo — Gordon. Kaj ankoraŭ nemultaj... Kaj tiu ĉi — lin mi fidas, kiel Silvestron Petroviĉ-on, kiel min mem. Li estas kuraĝa, rektanima, en plenumo de

sia militista devo la morton mem li superos, sed faros bone. Kaj estas plej lerta maristo. Galera floto estas malfacila afero, sed li, kun Dia helpo, sukcesas. Li vin prenos, donos al vi galeron sub komandon. Aŭskultu min, mi ne vane konsilas. Ĉu vi silentas?

Ivano Ivanoviĉ mallevis la kapon.

— Kiel la patro — obstina! — trankvile diris Apraksin. — Kiel vi deziras. Okazos batalo — vi envios al la galera floto, ĝi nun ĉe ni grandajn aferojn faras. Do, al Kalmukov?

— Al li, sinjoro general-admiralo.

— Do iru! Diru en mia nomo al la skribisto ordonon skribi.

Rjabov ekstaris, riverencis.

— Tamen al la admiralo ni eniros! — diris Apraksin. — Li al vi rigardu. Li kun via patro kune min ĉe Viborgo savis, la patron li konas, devas ja li ankaŭ al la filo rigardi. Kaj vi similas al la patro...

Duope ili trairis la vestiblon, eniris en ĉambron malpli grandan, ol tiu, kie sidis Teodoro Matejeviĉ. Ĉe malgranda fenestro peze kliniĝis super mapoj admiralo Botsis. La kolumo de la uniformo estis strikte apoganta lian kolon; la vizaĝo, ĉirkaŭita de grizaj krispaj haroj, estis trankvila kaj senmova. Kaj tia silento staris en la varmege hejtita ĉambreto, ke al Rjabov tuj iĝis zumado en la oreloj.

— Sinjoro admiralo! — nelaŭte prononcis Apraksin.

Botsis ne respondis. Teodoro Matejeviĉ rapide aliris al li, prenis lian manon. La admiralo ŝanceliĝis, malrapide komencis fali sur la dekstran flankon. Duope ili levis lian pezan, tute

senmovan korpon, metis sur la tablon — sur disĵetitajn Merkatorajn mapojn, sur desegnaĵojn de galeroj, sur paperojn, kiujn li tiom antaŭ nelonge legadis kaj subskribadis.

Eniris matrosoj, alkuris la skribisto, la servosoldato de Botsis; hazarda subleŭtenanto trovis kandelon, bruligis ĝin ĉe lia kapo. Teodoro Matejeviĉ kisis la forpasinton al la frunto, demandis la servosoldaton:

— Li de kiu kredo ja estis? Ĉu de katolika?

La servosoldato, plorante, respondis:

— Kiu scias...

— En kiun preĝejon li iradis?

— Ja en neniun, sinjoro general-admiralo. Kiam la tavernon oni aranĝis — li tien bieron trinki iradis. Sed cetere ĉiam sur ŝipoj.

— Ĉu ikonon li havis?

— Ŝajne Dipatrinon...

— Alportu!

La servosoldato forkuris, tuj revenis. La forpasinto havis loĝejon samloke, apud la Admiraleja kolegio. Apraksin prenis ovalan en arĝenta kadro portreton, longe fiksrigardis la subtilan, orgojlan kaj belegan vizaĝon de juna nigrahara virino kun odorrozo sur velura robo, metis la portreton sur la bruston de la forpasinto.

Venis Ievlev, anhelante eksidis sur benkon. Sakristiano jam estis leganta la psalmaron, vakso estis gutanta sur marajn mapojn, ekodoris je incenso. Al Teodoro Matejeviĉ subite skuiĝis la vizaĝo, li svingis la manon, eliris en la vestiblon. De

tempo al tempo frapadis pordo — venadis famaj maristoj de la Rusia floto: brigadestro Ĉernišov, vicadmiralo Crøys, šipestro Zmajevič, Golicin, Weide; venadis matrosoj, servintaj sur galeroj de Botsis; rapide krucosignante sin, riverencis al la forpasinto Aleksandro Danilovič Menŝikov, kisis lin al la malvarma frunto general-feldmarŝalo Boriso Petrovič Ŝeremetev. Kapitano Strillé demandis Menŝikov-on flustre:

— Neniu scias, sinjoro Menŝikov, kiel sepulti la forpasinton... Li... bedaŭrinde... ne tro ĝenis sin... per preĝo. Deirante de tiu cirkonstanco, ni ne povas decidi, per kia rito adiaŭi la restaĵojn de admiralo Botsis...

— Ja per la rusa! — rapide respondis Menŝikov. — Ni lin opiniis rusa homo, laŭ la rusa, ortodoksa rito ni lin sepultu. Li estis por ni propra, li niajn malĝojojn komprenis, pri niaj ĝojoj ĝojis. Tial vi, kapitano, ne klopodu...

En la vestiblo Apraksin diris al Ivano Ivanovič:

— Jen ĝi, sorto! Ni apude sidis kaj konversaciis, kaj li ĝuste tiutempe estis mortanta sola. Do, iru, amiko, iru de ĉi tie, por vi pri morto ankoraŭ estas frue pensi, sed por ni estas ĝusta tempo. Iru al Kalmukov, li vin akceptos bone.

La markadeto foriris. Teodoro Matejevič eksidis en sian fotelon antaŭ la estingiĝinta kameno, glutis malvarman kafon, por longe enpensiĝis. Poste apud li eksidis Ievlev, demandis:

— Kaj kial al ni tiel malfortunas, Teodoro Matejevič? Kiam estas bona homo, tiu mortas subite. Kaj nun kiun al la galera floto oni nomumos? En la nuna jaro ŝerci ne eblas, ni grandajn aferojn faros...

— Ja vin ni nomumos al la galera floto! — diris Apraksin.

— Min ne eblas!

— Kial tiel?

— Ja tial, ke mi iujn fremdlandanojn kiel hundojn el mia floto tuj forpelus. Kaj Petro Aleksejeviĉ tion scias.

La general-admiralo ne respondis, mallevis la okulojn. Poste diris:

— Se ekzistas ie de forpasinta Botsis parencoj, necesas pension asigni, por ke oni sciu: kiu al Rusio servis fidele kaj diligente, pri tiu oni ne forgesas. Kaj Petron Aleksejviĉ-on peti, ke li ne avaru.

— Neniun havis Botsis, — diris Ievlev. — Li estis sola en la tuta Dia mondo...

3. Asembleo

Kvardekkanona ŝipo «Sankta Antonio», sur kiu tenis sian flagon Kalmukov, staris en la rodo de Kronŝloto, kiam al ĝia eskalo aliĝis velboato kun markadeto Rjabov. Vaĉanta matroso severe demandis Ivanon Ivanoviĉ-on kaj per fajfilo vokis vaĉantan subleŭtenanton. Ĉio estis farata rapide, strikte kaj inteligente sur tiu ĉi ŝipo, kaj Ivano Ivanoviĉ tuj eksentis, ke servo ĉe Kalmukov estos kvankam malfacila, tamen sencohava, — sur tia ŝipo estas, kion lerni kaj sen afero oni ne enuos.

La subleŭtenanto, rapida kaj lerta junulo en strikta uniformo kaj en trikorna ĉapo kun pufa plumaĵo, retenante dum irado mallongan spadon, kondukis la markadeton ĝis la pordo de la kajuto de Kalmukov, frapis kaj, raportinte al Luko Aleksandroviĉ pri la nova oficiro, malaperis. Kalmukov, en

malbutonita uniformo, leviĝis de divano, pririgardis Ivanon Ivanoviĉ-on kaj atente tralegis la ordonon de la general-admiralo.

— Do vi el kiuj Rjabov-oj estas? — demandis li, faldante la paperon. — Ĉu ne de la unua piloto filo?

— De la unua! — kun malbone kaŝata malkontento respondis Ivano Ivanoviĉ. Lin ĝenadis tiuj ĉiamaj demandoj: ŝajnis, ke homoj, demandante, pensas: «Patro via ja estas bona, sed vi kia estas birdo?»

— Patron vian mi konas! — diris Kalmukov firme. Kaj trankvile plu pririgardadis la markadeton per siaj iom oblikvaj okuloj. — Elstara maristo. Mi havis honoron iradi en lokajn nemalproksimajn ŝerojn kaj multon ŝuldas al li. Mi senĉese de li lernas...

Ivano Ivanoviĉ silentis, pensante: «Ne novaĵo! Mi ja ĉion ĉi scias!»

— Mi esperas, ke patro via ankaŭ vin konas, sinjoro markadeto, kaj se konas, tiam vi havas lian fidon, el tio mi faras konkludon: bona oficiro estas nomumita sur mian ŝipon. Mi ĝojas. Eksidu, vi tagmanĝos kun mi.

Rjabov eksidis, la aŭditaj vortoj vigligis lin, en la animo iĝis pli trankvile. Kalmukov tiutempe parolis:

— Mi, markadeto, ankaŭ vin mem ekde la tempo de la sturmo de fortreso Noteburgo memoras, kiel vi tie tamburon vigle frapadis. Tiutempe viaj hartufoj longegaj elkreskis, kaj kiam mi vin vidadis, ĉiam vi ion manĝis kaj ronĝis — jen pankruston, jen biskoton, jen brasikstumpon. Vi forgesis, eble?

— Ne, mi ne forgesis. Mi havas bonan memoron.

Sen frapo malfermiĝis la pordo, en la kajuton de Kalmukov eniris mirindaspekta matroso — diketa, kun grizhara buklo super la frunto, kalva, en la franca demandis, ĉu porti finfine la manĝaĵon, aŭ ankoraŭ atendi senfinan tempon. Luko Aleksandroviĉ en la rusa respondis:

— Dufoje al vi estis dirite: porti! Dufoje! Kiom ankoraŭ necesas? Trian fojon mi diras: portu!

— Sed tiam la manĝaĵo ankoraŭ ne estis preta! — ree en la franca kun kaprica tono en la voĉo diris la matroso. — Ja, dank' al Dio, mi estas sperta pri gastronomio, mi povas kompreni, kian manĝaĵon eblas sur tablon meti, kaj kian eĉ porkoj ne voros...

— Portu do! — kun suspiro ordonis Kalmukov.

— Kaj ĉu vinon porti?

— Kaj vinon portu!

— Sekan, lakrimon aŭ lafiton?

— Ho, Dio mizerikorda! — kun mallaŭta ĝemo diris Luko Aleksandroviĉ. — Brandon al ni portu po glaseto...

— Brandon por oficiro estas tute maldece drinki! — eldiris la matroso. — Ni pri tio plurfoje konversaciis, sed vi plu persistas. Ja se pri la mara afero vi, sinjoro kapitan-komodoro, pli kompetentas ol mi, tiam pri traktado, pri tualetoj, pri manieroj kaj pri manĝaĵoj kun vinoj mi ĉi tie estas la unua homo. La sorto malbonan ŝercon kun mi ludis, sed pro tio, ke forlasis min la fortuno, neniom alia mi iĝis.

Kaj, turniĝinte al Rjabov, li daŭrigis kun tremo en la voĉo:

— Ĉu vi kredas, sinjoro, diversaj personoj plej indaj kaj

kavaliroj venas al nia tablo, ĝis eĉ vicadmiraloj kaj ambasadoroj. Sed por *monsieur* Kalmukov estas tutegale, kia manĝaĵo estas donita, — nur kulero en ĝi staru. Li likvan manĝaĵon ne prenas en la buŝon, sed postulas, ke estu kun pipro, kun ajlo, kun cepo — varmega kaj densa. Vinoj — *Lacryma Christi* kaj aliaj ceteraj — staras en la vinkelo sen uzo, sed...

— Portu! — frapinte per la pugno al la tablo, kriis Kalmukov. — Turmentanto!

La matroso ŝultrolevis, pufigis la grizan buklon super la frunto. Rjabov kun rideto demandis:

— Ĉu li estas frenezulo?

— Kial frenezulo? Mia kruco — Spafariev, nobelo. Ĉu vi ne aŭdis la historion...

Ivano Ivanoviĉ respondis, ke la historion li aŭdis.

— Ĝuste li estas la heroo de ĉi fablo. Por ĉiuj aliaj estas rido, sed por mi pro miaj pekoj estas infero sur la tero. Kion mi kun li faru? En matrosa ejo por li vivi ne eblas — molestas oni lin tage kaj nokte, mi prenis lin al mi — ĉu vi kredas, markadeto, — fojfoje venas penso: ĉu mi mortigu min mem? Dum dek unu jaroj sur mi tiu pezaĵo pendas. Vergus mi lin, satanon senvostan, nur unu fojon, unusolan, sed ne, ne leviĝas la mano. Ne povas mi! Kaj li tion uzas! Eksidis sur la kolon kaj sidas, kaj ne eblas deĵeti, ĝis mia morto mem mi ĝisvivos kun ĉi brava rajdanto sur la ŝultroj.

Spafariev alportis bovlon, metis sur la tablon, proklamis:

— Supo *printanier à la Ludovic*...

— Pano kie estas?

— Sed mi havas nur du manojn, ne povas mi disŝiriĝi!

Kalmukov forte kunpremis la makzelojn. La supo estis tiom aĉa, ke Rjabov, malgraŭ malsato, ne povis manĝi eĉ du kulerojn. Luko Aleksandroviĉ ordonis forigi la bovlon, kaj alporti matrosan brasiksupon kun eperlanoj. Ili ree atendis, poste manĝis densan, sed malvarmiĝintan brasiksupon. Post la tagmanĝo Kalmukov kondukis Rjabov-on al destinita por li kajuto, kie apud kanono leŭtenanto kun nigraj lipharoj laŭtlegis per malvarmuma voĉo el moda libro sub titolo «Spegulo honesta de l' juneco, aŭ Instruo pri la bonmaniera konduto, kolektita de diversaj aŭtoroj».

Kalmukov sidiĝis, apogis sin per la mano, komencis aŭskulti. Ivano Ivanoviĉ aŭskultis stare:

— «Sen demando ne paroli, kaj kiam okazos al ili paroli, tiam devas ili dece, sed ne krie, nek kolere aŭ ekscite paroli, ne kvazaŭ senprudentuloj. Maldece estas per la manoj kaj la piedoj sur la tablo ĉie vagi, sed endas manĝi humile. Kaj per forkoj kaj tranĉilo al teleroj, al tablotuko aŭ al plado ne streki, ne piki kaj ne frapi, sed sidi kviete kaj humile, kaj ne kun la manoj sur la koksoj...»

— Nu, komplika saĝaĵo! — oscedinte, diris Kalmukov.

En tiu momento ĉe la eskalo rule ekbatis tamburo, alarme ekhurlis klariono. Sur ŝtupoj ektondris pezaj matrosaj botoj, oficiroj ekkuris al la lokoj. Kaj tuj per rapidaj paŝoj la pobferdekon trairis Petro kun Apraksin kaj Menŝikov. Kalmukov malfermis antaŭ ili la pordon de sia kajuto, ĉio denove por longe iĝis kvieta. Poste al «Sankta Antonio» unu

post alia komencis aliri kurieraj ŝipoj — skolta boato sub oblikva velo, transporta ŝipo «Papilio», brigantino. Ivano Ivanoviĉ demandis la nigralipharan leŭtenanton, kio fariĝas, tiu strabis al la markadeto, trumpete tuspurigis la gorĝon, respondis:

— La Siro glaciojn rigardas. Oni aŭdis, ke granda afero komenciĝos kun puriĝo de la maro. Dume ni atendas. Li mem preskaŭ ĉiun tagon estas ĉe ni, ĉi tie li ankaŭ manĝas, ĉi tie ankaŭ ripozas iam.

Oficiroj de la transporta ŝipo, de la velboato, de la brigantino vizitis la kajuton de Kalmukov, revenis al siaj ŝipoj. Post malgranda tempo ankaŭ Petro foriris sub velo al Kronŝloto. Ĉe mallevo de la flago Ivano Ivanoviĉ staris etendiĝinte en linio kune kun aliaj oficiroj de «Sankta Antonio», enspiradis la humidan aeron de la golfo, rigardis al flavaj flagrantaj fajretoj de Kronŝloto kaj pensis pri tio, ke lia mara servo komenciĝis. Lia koro batis trankvile, egale, per potencaj puŝoj pelis la sangon tra la tuta korpo. La okuloj rigardis akre, en la animo estis hele kaj serene, kiel okazas en juneco, kiam la estonteco ŝajnas bonega, kiam ankoraŭ videblas nek kavoj, nek holmetoj sur la viva vojo, kiam la juna rigardo sentime kaj fiere trovas en la estonteco sian rektan, honestan vojon...

Post la mallevo de la flago Rjabov ankoraŭ longe staris sur la pobferdeko, poste malleviĝis en la kajuton, kuŝiĝis en tolan pendoliton kaj fermis la okulojn, sed ne sukcesis bone ekdormi, kiam subite ekvidis Irena-n Silvestrovna-n, kvazaŭ ŝi estis ĉi tie kaj ridetis karese kaj ruze, parolis, kiel hieraŭ — adiaŭante:

— Paĉjo nepre edzinigos min al vi, kvankam panjo

kontraŭstaros iom. Vi estas juna por ŝi, servi ankoraŭ ne komencis, kvankam jen Venjon vizitas unu flota oficiro — li aĝas pli ol tridek, por panjo same ne plaĉas — kial li estas el kalmukoj?

«El kalmukoj!» — rememoris la markadeto kaj eksidis en sia balanciĝanta lito. — El kalmukoj! Ĝuste li estas, Luko Aleksandroviĉ, — ne povas esti alia! Kaj Silvestro Petroviĉ lin konas kaj tre lin laŭdas. Jen — sorto!»

En la sekva tago, post kiam la kapitan-komodoro skoldis oficirojn pro ĉenkuglega pafado, Ivano Ivanoviĉ frapis al lia kajuto kaj demandis, ĉu vizitas li la domon de admiralo Ievlev. Luko Aleksandroviĉ demetis libron, pensis iom, rekte ekrigardis al Rjabov, respondis:

— Kaj vi tion por kio bezonas?

— Por tio, sinjoro kapitan-komodoro, ke mi ĝuste scias: hodiaŭ vespere en la domo de Silvestro Petroviĉ estas lota asembleo...

Kalmukov frotis la frunton per la polmo, pensis.

— Mi ja ne estis vokita!

— Al asembleo laŭ la cara ukazo neniu estas vokata. Ĝi estas deklarata por ĉiuj, kiuj deziros veni.

— Ruza vi estas, kadeto. Ĉion vi scias!

— Neniam estinte en asembleo, dezirus mi vidi tiun, sinjoro kapitan-komodoro, pro tio mi scias...

— Dezirus!

Li etendis la manon al la libro, foliumis paĝojn, ankoraŭ mokimitis la markadeton:

— Vidi tiun. Tiun — kiun?

Rjabov per glata voĉo respondis:

— Pri tio ŝerci estas nekonvene, sinjoro kapitan-komodoro, kaj se iu deziros — tiu unue kun mia spado ŝercos...

Kalmukov miris, ekrigardis al la subite paliĝinta markadeto, demandis:

— Ĉu vi freneziĝis?

Ivano Ivanoviĉ silentis.

— Indus ŝiri al vi la orelojn, al stultulo! — bonanime prononcis Kalmukov. — Kie oni aŭdis tion — al sia komandanto per spado minaci. Jen, staras, paliĝis tuta! Se mi vin forpelos puŝe el la ŝipo — kion vi al Apraksin raportos?

Li ekstaris, trairis la kajuton, demandis:

— Kaj kial do min neniu timas, ĉu? La servosoldato sur la kolon sidiĝis, la markadeto nur duan tagon servas — per spado minacas. Ne estas tia oficiro sur la ŝipo, kiu de mi ne pruntis monon, sed ke redonis — mi ne memoras. Kial tiel?

Kaj kun ridinda nekompreno li dismovis la manojn.

Ivano Ivanoviĉ diris nelaŭte:

— Pardonu, sinjoro kapitan-komodoro, mi tro ekscitiĝis. Kaj ke vin neniu timas, tio estas por bono. Oni ne timas, tamen pro vi ĉiu en fajron kaj en akvon iri pretas. Mi kvankam nelonge estas sur la ŝipo, sed aŭdis.

— Konas mi ilin, diablojn! — eldiris Kalmukov kaj demandis: — Do al la asembleo, ĉu?

Li enpensiĝis, atente fiksrigardis al Rjabov, poste diris:

— A ha! Jen li — iu markadeto, kiun tie ĉiuj atendis, jen li el la navigista lernejo, kiu longe ne venadis. Vera Silvestrovna al mi pri ĉi markadeto mem diris kiel pri la kazo de melankolio de Irena Silvestrovna...

Li vokis Spafariev-on kaj ordonis alporti vestaĵojn.

Post ne pli ol duonhoro la markadeto kaj la kapitan-komodoro malleviĝis en velboaton. De la maro blovis egala favora vento; post kelkaj horoj de rapida iro, kaj nelonge antaŭ printempa krepusko Kalmukov en mallonga mantelo, kun spado, en trikorna ĉapelo kaj Rjabov en markadeta uniformo, kun roversoj de verda drapo, en neĝblanka strikta koltuko, en ŝtrumpoj kaj ŝuoj — leviĝis laŭ lignaj ŝtupoj sur la Bazilan insulon, ĝuste kontraŭ la Ievlev-a bieno. Pli ol du dekduoj da ŝipoj staris ĉe la albordiĝejo. Kalmukov rekonis velboaton de Apraksin, ornamitan, tute en brokaĵo kaj tapiŝoj, dekduremilan boaton de Menŝikov, mallarĝan, rapidan, sen ajnaj ornamaĵoj boateton de Petro. El la domo de Silvestro Petroviĉ venadis sonoj de orkestro, ludanta malakorde. Aparte aŭdiĝis kaj fagoto, kaj hobojo, kaj trumpeto, kaj timbaloj. Sur la perono maljuna, dika, gaja Pamburg estis akvumanta el ĉerpilo la kapon de sia amiko Varlan. Iuj nekonataj oficiroj estis ripozantaj sub printempa vento, grandega leŭtenanto-preobraĵenskano ekkriadis kun larmoj en la voĉo:

— Mi la vivon por li fordonos! Je Dio, fraĉjoj! Li prenu! Li al morto tuj sendu. Jam nun...

Ĉe la kaleŝejo, sur renversita ĉaro, sur kunmetitaj brulŝtipoj, simple sur la tero, kie estis pli seke, sidis ĉifonvestitaj, kun elturmentitaj vizaĝoj, surkreskitaj per vilo soldatoj — ĉirkaŭ kvindek homoj. Timide, silente ili aŭskultis la gajan bruon de

la asembleo, muzikon, ĵetadis timajn rigardojn al oficiroj — sataj, bone vestitaj, laŭtvoĉaj.

La oficiro-preobraĵenskano aliris la soldatojn, kriis:

— Kanajloj! Perfiduloj! Al ĉiuj vi la kapojn forhaki, diabloj, transfuĝuloj...

La soldatoj ekstaris, etendiĝis. Unu apenaŭ povis stari, apogis sin per la flanko al la muro de la ŝedo. La leŭtenanto etendis la manon, eltiris la soldaton antaŭen, globigante la stultajn, ebriajn okulojn, ekkriegis:

— Ĉiujn vin mi mortigos! Ĉiujn ĝis la lasta.

Kalmukov paŝis antaŭen, la leŭtenanto jam estis eltiranta la spadon el la ingo — povus okazi malfeliĉo. Luko Aleksandroviĉ metis la manon sur la tenilon de la spado, diris severe:

— Atendu mortigi, flavbekulo, stultulo!

Kaj li subite ekvidis tion, kion ne rimarkis unue: ĉe ĉiuj soldatoj, ĉe ĉiuj ĝis la lasta estis forhakitaj la dekstraj manoj.

— Kaptitoj! — klarigis troviĝanta ĉe la soldatoj gardisto. — De la svedoj ili hieraŭ transiris. Al nia limposteno mem. Sinjoro policestro neniel povis decidi — kion fari kun ili. Oni pelis ilin ĉi tien, al la veno de la Siro, sed la Siro jam estis alveturinta.

— Mi diras: perfiduloj! — ree kriis la leŭtenanto kaj ankoraŭ tiris sin al sia spado, kiam subite grandega mano kuŝiĝis sur lian ŝultron, li ekturnis la kapon kaj malforte oĥis: post lia dorso, kun pipo en la dentoj, senkapvesta, en trivita admirala kaftano staris Petro. Apud li, rapide kaj lerte

elkraĉante ŝelon, estis ronĝanta pinajn nuksojn Menŝikov.

— Siro! Suno nia! — hurlis la preobraĵenskano.

— Tedis vi hodiaŭ al mi, kia babilulo! — ĉagrene diris Petro kaj, forpuŝinte la leŭtenanton, dense aliris al la soldatoj.

Ili staris senmove, fiksinte la elturmentitajn okulojn sur Petro.

— Nu? Kiel tio estis? — demandis li, malŝate pririgardinte iliajn ronĝitajn vizaĝojn. — Ĉu vi ekdeziris svedan laktan kaĉon? Kapitulacis?

Kaj ordonis:

— Montru la manojn!

Kvindek stumpoj etendiĝis antaŭen.

— Parolu vi! — ordonis Petro al maljuna soldato, kiu estis apogiĝanta sur lambastono nemalproksime de Rjabov. — Laŭ ordo rakontu!

La soldato suspiris, rakontis mallonge, ke ĉiuj ili trafis al la sveda kaptiteco vunditaj, sen konscio. Ili kuŝis poste en tendo, flegado estis bona, nutrado same nemalbona — oni donadis varman manĝon, branajn flanojn, akvon kiam ili deziris. Kiam ili resaniĝis — oni vicigis ĉiujn antaŭ la tendo, ili atendis longe. Poste sur ĉarumo du svedaj soldatoj alveturigis ŝtipon — kiel tiuj, sur kiuj viandistoj hakas viandon. Ankoraŭ ili alveturigis kupran kaldronon, bruligis sub ĝi fajron, en tiu kaldrono bolis oleo. Kiam ĉio estis farita, venis ekzekutisto. Post la ekzekutisto venis sveda generalo, kun li tradukisto. En la nomo de la reĝo ukazon laŭtlegis tiu tradukisto. En la ukazo estis dirite, ke ordonas la reĝo sveda al la rusaj kaptitoj,

nombre kvin dekoj, forhaki la dekstrajn brakojn, por ke, reveninte en Rusion, ili al ĉiuj montradu siajn stumpojn, dirante ĉe tio, kiom terure estas militi kontraŭ la svedoj. Kaj ĉar la reĝa korfavoro estas nemezurebla, do haki pro lia mizerikordo niajn brakojn estis ordonite ne de la ŝultro, sed nur la manojn.

— Nu? — ree kriis Petro.

Lia buŝo tikis, la okuloj brulis per malhela flamo.

La soldato rakontis, kiel ekbatis tamburoj, kiel la ekzekutisto prenis la hakilon. Ĉies stumpon oni mergadis en bolantan oleon, por ke ne komenciĝu gangreno. Poste oni ne nutris, kvankam donadis trinki akvon. Post tago per pieda vico oni pelis ilin sur ŝipon, elŝipigis sur firmaĵon, ree kondukis tra bienetoj kaj vilaĝoj. Antaŭ nokto ili estis ĉe la limo. Fine la sveda oficiro ankoraŭ foje ordonis — iri ĉie kaj rakonti, kiom malfacile estas militi kontraŭ la svedo.

Estiĝis plena silento, aŭdeblis nur, kiel Menŝikov disronĝas nuksojn. Petro turniĝis al li, lekis siajn lipojn, ordonis:

— Ĉiujn kvindek promocii al serĝentoj, ĉu vi aŭdas, Aleksandro Daniloviĉ!

Menŝikov kapjesis.

— Ĉiujn kvindek vesti per bonaj uniformoj, doni al ĉiu po rublo da mono.

— Po rublo! — ripetis Menŝikov.

La soldatoj staris senmove, kvazaŭ rigidiĝis. Ĉe tiu, kiu rakontis, la vila vizaĝo estis tremanta.

— Ĉiun nomumi al regimentoj. En la Preobraĵenskan — ĉi

rakontanton, en la Semenovskan, en aliajn po unu. Sur grandajn ŝipojn same po serĝento.

Kaj kriis:

— La soldatoj de la Rusia armeo, matrosoj de la Rusia floto per ĉi ekzemplo ĉiutage vidi povu, kiel malfacile estas al svedoj kaptiĝi. Kaj nun de mi al ili por varmiĝo elrulu barelon da brando kaj manĝigu sate.

Li turniĝis, kun la ŝultro antaŭen ekpaŝis al la domo. La preobraĵenska leŭtenanto subite ĵetiĝis al liaj piedoj, kriis:

— Siro, ordonu la vivon fordoni, ordonu por vi al morto...

— Ho, tedis vi al mi hodiaŭ! — diris Petro. — Tedis, sinjoro. Kaj mensogas ja vi ĉion...

— Per vorto de mia honoro! — ree kriis la leŭtenanto.

Petro ne finaŭskultis, revenis en la domon. Ĉi tie sub sonoj de hobojo kaj fluto oni dancis anglezon. Ivano Ivanoviĉ kaj Kalmukov haltis en la pordo, paroj de dancantoj moviĝis en tia denseco, ke trairi pluen estis neeble. Forte odoris je sebaj kandeloj, parfumo, jufto. Tabaka fumo onde naĝis super uniformoj, kaftanoj kaj pufaj longaj perukoj, super altaj hararanĝoj de damoj, super general-prokuroro Jaguĵinskij, kiu kun carino Katarina iris en la unua paro, super pensema Apraksin, kiu ceremonie kondukis Irina-n Silvestrovna-n, super barono Ŝafirov, kiu, ridinde saltetante kaj grimacante, dancis kun Vera Silvestrovna. Maria Nikitiŝna same dancis kun Jegoro Rezen, Ievlev ceremonie riverencadis al Daria Miĥajlovna Menŝikova...

— Sinjorinoj kaj sinjoroj! — larĝe malfermante la buŝon, kriis Jaguĵinskij. — Faru ekde nun ĉion ripetante post mi, por

ke nia gajo vere ridinda iĝu! Kavaliroj kaj damoj! Rapide!

Katarina, metinte siajn rozkolorajn, kun multaj fingroringoj manojn sur la ŝultrojn de Jaguĵinskij, facile leviĝis sur la piedpintojn kaj kisis sian kavaliron al la mentono; ĉiuj damoj, irantaj en la danco, faris la samon. Batis timbaloj, stride ŝrikis fluto, malalte ekzumis trumpetoj. Katarina, mordetante la lipojn, etendis la manon kaj tiris la perukon sur Jaguĵinksij, tiel ke la general-prokuroro por momento kvazaŭ blindiĝis. Perdinte sian damon, li ekturniĝis sur la loko, kaj Katarina, malrapide ridetante kaj montrante kavetojn sur la rozkoloraj vangoj, serĉis per siaj egale brilantaj, trankvilaj okuloj alian kundancanton. Ĉiuj kavaliroj estis okupitaj, krom Apraksin, de kiu Irena Silvestrovna senintence tute deŝiris la perukon. Teodoro Matejeviĉ, grizhara, kun glata krono de lanugaj haroj ĉirkaŭ la kalvo, riproĉe balancis la kapon al Irena, kaj ŝi tiutempe jam donis la manon al iu markadeto, kiu flekseble kaj lerte, brilante per humida lumo de la verdaj okuloj, ekkondukis sian damon en ceremonia kaj malrapida danco.

— Nu, Teodoro ja Matejeviĉ! — vokis Katarina kun nerusa akĉento. — Donu via man'!

— Mi la perukon perdis, moŝtino! — respondis Apraksin. — Sen peruko...

— Tio ĉiuj vidas, ke vi perdis peruk'! — diris Katarina. — Sed tamen vi ĉi tie estas la plej bona dancant'...

Kaj ŝi ĵetis al li tian rigardon, ke Teodoro Matejeviĉ nur suspiris kaj mallevis la okulojn, serĉante per la okuloj sub la piedoj de la dancantoj sian, de koloro de matura sekalo, faritan en Parizo perukon.

Kaj Luko Aleksandroviĉ plu staris ĉe la pordo, rekta, larĝŝultra, distrite kaj malgaje sekvis per la iom oblikvaj okuloj Ŝafirov-on, kiu plu saltadis kaj grimacadis, faradis figurojn kaj kunkantis kun la muziko, sekvis ĝis kiam finiĝis la senfine longa danco kaj la viroj kondukis siajn damojn trinki bieron kun glacio. Tiam la kapitan-komodoro, flankenpuŝante per si ĉiujn aliajn, la unua traŝiriĝis en la bufedon, la unua prenis en la manojn arĝentan glason kaj la unua donis ĝin al Vera Silvestrovna, kiu levis al Kalmukov la helbluajn okulojn, ridetis kun infana admiro kaj ekkriis:

— Aĥ, Luko Aleksandroviĉ, kiom multe vi malfruis al la komenco de nia asembleo. Ĉu eblas tiel?

Kalmukov, elektante vortojn, per kiuj oni devas paroli en galanta socio kun fraŭlino, pensis kaj respondis nelaŭte:

— Supozis mi erare, sinjorino, ke al asembleo oni invitas nur per skribaj paperoj, aŭ per speciale senditaj servantoj...

— Tamen, sinjoro, feliĉe okazis, ke la eraro estis korektita kaj vi estas ĉi tie inter ni. Kiu do eltiris vin el via eraro?

— Iu markadeto, konata en via kara familio kaj nun nomumita al servado sur mia ŝipo.

— Ĉu sur «Sankta Antonio»? Ĉu ne Ivano Ivanoviĉ estas ĉi markadeto?

— Mi ĝojas konfirmi vian divenon, sinjorino. Ĝuste Ivano Ivanoviĉ Rjabov.

— Kiom ĝoja estas por mi, kaj des pli por bona fratino mia, tia sciigo. Markadeto Rjabov, la partopreninto de niaj infanaj ludoj, — sub via komando, sur via ŝipo? Ĉu scias pri tio Irenjo?

— Mi nutras esperon, ke scias! — respondis Kalmukov, fiksrigardante al malfermita pordo de la najbara ĉambro, kie la brilanta pro feliĉo markadeto estis ion rapide kaj pasie diranta al Irena Silvestrovna. — Kaj se bona fratino via ankoraŭ ne scias la agrablan novaĵon, tiam ŝi tuj ekscios.

Vera Silvestrovna kun krako malfaldis novan ventumilon kaj priblovante sian ardan vizaĝon, prononcis:

— Kiom varmege estas hodiaŭ en nia domo, kvazaŭ en forĝejo de Belzebuto. Kaj kiom agrable estas en tia sufokeco refreŝigi sin per gluto de malvarma trinkaĵo. Kial vi ne faru por vi tian plezuron...

Luko Aleksandroviĉ streĉiĝis, serĉante pli galantajn vortojn, kaj respondis ne tuj.

— Pro nehavo de vazo por tiu malvarma trinkaĵo, sinjorino Vera Silvestrovna.

— Sed vi ja dezirus refreŝigi vin?

— Ĝi estas ne tiom grava!

— Kial ne grava, se soifo turmentas vin, kaj en mia vazo ankoraŭ estas malvarmaĵo...

La kapitan-komodoro rigidiĝis, sed tio estis vero — Vera Silvestrovna per sia maldika maneto estis etendanta al li la pezan glason, ĝuste tiun glason, el kiu ŝi ĵus trinkis mem.

— Nur unu gluto da malvarma trinkaĵo, kaj vi eksentos vin kvazaŭ en Edenaj ĝardenoj, — diris Vera. — Dolĉa, bona biero...

— Ho, sinjorino Vera Silvestrovna! — respondis Kalmukov. — Vi estas tro favora al mi...

Kaj tuj ordoninte al si — «hodiaŭ aŭ neniam», per la subite sekiĝintaj lipoj li nelaŭte, sed firme eldiris:

— Mi nutras ankaŭ esperon, ke tiu ĉi vazo estas ne lasta, per kiu estos estingita nia komuna soifo...

La frazo rezultis ne tre komprenebla, probable, eĉ tute malklara, kaj Vera Silvestrovna nur ĵetis nekomprenan rigardon al Kalmukov. Li timidiĝis, penis diri pli kompreneble, sed tute implikiĝis kaj eksilentis, mallevinte la kapon. Silentis ankaŭ Vera Silvestrovna, forturniĝinte kaj priblovante sin per la ventumilo. Li sentis, ke ŝi ne plu deziras aŭskulti lin kaj ke nur atendas okazon, por foriri de li. Kaj nelaŭte, ne plu elektante vortojn, li ekparolis tial, ke ne povis ne rakonti al ŝi tion, kio fariĝis en lia animo:

— Hodiaŭ mi por ĉiam al vi, sinjorino, adiaŭos, ĉar, kiel komprenis mi, por mi estas nenia espero. Do, en tio neniun eblas kulpigi, krom min mem, ke, estante en aĝo, pro vi mi tute perdis racion kaj ekrevis pri strangaĵo. Por mi vivo fariĝis ne vivo sen vi, sinjorino Vera Silvestrovna, nur pri vi miaj ĉiuj pensoj estis — kaj en maro, kaj sur bordo, kaj nokte, kaj tage — ĉiam. Nu do pri ĉi malgajoj hodiaŭ estas malfrue kaj sensence paroli...

— Danco menueto! — kriis Jaguĵinskij, kaj tuj ie tute proksime ektondris timbaloj kaj ekkriis trumpetoj. — Kavaliroj invitu damojn kun gajo kaj afablo. Damoj sen afekto kaj preciozeco, konformu al la kavaliroj...

Nekonata oficiro — rozkolora, kun kavetoj sur la vangoj, kun lipharetoj — alflugis al Vera Silvestrovna, ne rimarkante la kapitan-komodoron, kunfrapis antaŭ ŝi la ŝuojn, fleksiĝis en riverenco. Ŝi donis al li la manon. Lastfoje la kapitan-

komodoro ekvidis ŝian kolon kun blua maldika vejno, la ventumilon, brilantan, susurantan satenon de la robo. Ne plu levante la okulojn, malĝentile dispuŝante homojn, li eliris en la vestiblon, trovis sian mantelon kaj, atendante neniun, malleviĝis de la perono. Estis malvarme, trapenetranta vento blovis de Nevo, plende knaris ventmontrilo sur la tegmento de la Ievlev-a domo, kun krakado frotiĝis inter si per la flankoj boatoj, gigoj, velboatoj...

«Jen kion mi elpensis, — haltinte sur la albordiĝejo, diris al si Luko Aleksandroviĉ. — Jen pri kio mi revis, jen al kiu mi rigardis! Ne, frato, maljuna vi estas, kaj parvenuo, kiom ajn vi sciu vian aferon, kiel ajn vi faru ĝin, tutegale vi ne iĝos propra inter ili. Ili laŭdos, kaj afable akceptos, kaj rangon donos, sed ĉion fremde! Kaj eĉ sen tio, probable, ili malĝojas, ke ĉi markadeto de kampula deveno estas propra en la hejmo, povas esti, svatiĝos, kaj jen ankoraŭ unu — el kalmukoj, el servistoj!»

Kun angoro li trairis laŭlonge de la malhela albordiĝejo, fiksaŭskultis fajfadon de vento, sonojn de muziko, tondrinta en la domo, kaj subite rememoris la foran infanecon, kiel rajdis li sur malalta, rapida ĉevalino tra senlima stepo, kiel aŭskultis fajfon de stepa, odora vento, kiel leviĝadis super la stepo la ruĝa suno, kiel karesis lin, surĉevalan, kuraĝan, kun pafarko kaj sagoj en sagujo, lin, ĉasiston, — la patrino kaj kia ŝi estis ĉe li kaj bela kaj bonkora...

«Se mi povus al ŝi ĉion rakonti, — pensis li, envolvante sin en mantelon, — al ŝi, al panjo. Sed ne estas ŝi, ne troveblas jam, probable, mortis, vendita al sklaveco, mi sola estas en la mondo, neniun mi havas. Neniun havas, nur la ŝipan servon,

matrosojn, kaj oficirojn, kaj maron...»

Li forte kunpremis la makzelojn — tiel, ke elstaris la malmolaj, akraj pometoj, suspiris, skuis la kapon, facile saltis en velboaton kaj ordonis veturigi sin al «Sankta Antonio».

Kaj Silvestro Petroviĉ ĝuste tiutempe estis diranta al Maria Nikitiŝna:

— Kiel rimarkis mi, Manjo, kapitan-komodoro Kalmukov longe hodiaŭ konversaciis kun Venjo, post kio senprokraste direktis sin for de ni. Ne alie, ol kun *Abschied*...

— Kio estas tiu «abŝid'»?

— *Abschied* estas rifuzo! — diris Ievlev. — Kaj rifuzo estas por bono. Luko Aleksandroviĉ estas homo ne malbona, sed tamen...

— Ĝuste, ke tamen! — kun kolero diris Maria Nikitiŝna. — Dankon al Dio, ke almenaŭ pri li vi komprenas bone, Silvestro Petroviĉ...

Hurlis kaj ululis trumpetoj, la domo de Ievlev tremis pro nekutimaj al ĝi novmanieraj dancoj, Silvestro Petroviĉ, snufante per pipo, ŝanĝis la temon:

— Admiralo Crøys post asembleo en la tuta domo ĉevronojn ŝanĝis. Ankaŭ ni eble devos elspezi monon. Putraĵo ekŝutiĝis...

En la unua paro kun Katarina iris Petro; ŝi, karese ridetante al li, diligente faradis ĉiujn paŝojn, li same laboris fervore. Fulgis kaj krakadis sebaj kandeloj, Ŝafirov plendis al Bruce:

— Avara estas nia Silvestro Petroviĉ, vaksajn kandelojn meti ne povis, sur veston sebo gutas, kaj odoraĉas...

— Ne ŝtelas li, pro tio estas avara! — abrupte respondis Bruce. — Per lia salajro vaksaj kandeloj ne multe aĉeteblas.

Post Petro en la dua paro dancis menueton Ivano Ivanoviĉ kaj Irena. Petro, en danco, demandis laŭte:

— Rjabov?

— Rjabov, Siro!

— Kiel tamburisto servis?

— Servis, Siro.

— Nun ĉe Kalmukov?

Katarina interrompis:

— Aĥ, kiel ĝi estas bele kaj afable — paroli eĉ tie ĉi pri via terura tamburoj...

— Tuj post la menueto! — diris Irenjo flustre al Ivano Ivanoviĉ.

Tiu silentis.

— Ĉu vi timas?

— Kaj se...

Li ne findiris. Ŝi ceremonie riverencis al li, poste ekrigardis per sia pura rigardo en la okulojn, diris, kiam ili ree ekiris apude, genufleksante samtakte kun la muziko:

— Kaj ĉu via patro Taisja-n Antipovna-n ne ŝtele edzinigis?

El ie el krepusko ree eliris, ŝanceliĝante, la grandega leŭtenanto-preobraĵenskano, deklaris al ĉiuj nedancantaj gastoj:

— Hodiaŭ li sendos min al morto — kaj mi iros! Je Dio, iros! Nu, kiu ne kredas?

Al li oni ĉitis, li kriis:

— Siro Petro Aleksejeviĉ, suno hela, deziras mi por vi sen ajna ĝemo akcepti morton...

Petro, dentomontrante, lasis Katarina-n, almoviĝis al la leŭtenanto, demandis:

— Sen ĝemo, kaj poste vin, hundon, fari generalo?

— Deziras! — kriis la preobraĵenskano. — Morton! Por vi!

Petro prenis lin ĉe la maniko, ektrenis kun si. Tiu kriis kun timo kaj ekstazo:

— Li min kondukas! Li min honoras! Kondukas!

La trumpetoj perplekse bojis, batis timbaloj, la sonoj de menueto ĉesis. Ĉiuj impetis tien, kien Petro ekkondukis la preobraĵenskanon. En la pordo fariĝis tumulto, falis tableto, aŭdiĝis, kiel ŝiriĝas ŝtofo — malsagaca kavaliro surpaŝis trenaĵon de sia damo, kaj la scivolema damo impetis antaŭen.

En malgranda angula ĉambro Petro per sia manego kaptis la manon de la leŭtenanto, malfleksis lian montrofingron, demandis base:

— Ĉu vi vere morti deziras?

— Por vi...

— Mensogas vi, bovina filo!

— Mi mortos sen vorto!

Per la maldekstra mano Petro kaptis feran kandelingon kun kandelo, ŝovis en la malgrandan, fulgantan flamon la kurban fingron de la leŭtenanto, base ordonis:

— Toleru, mensogulo, babila lango! Toleru, se por mi morti

deziras.

La preobraĵenskano malfermis la ruĝlipan buŝon, movis la dikajn krurojn, saltis, ŝrikis nelaŭte, poste plenvoĉe. Petro depuŝis lin de si, ordonis al Jaguĵinskij:

— Ĉi servilulon el la oficira stato por ĉiam eksigi kaj kiel soldato sendi ien pli malproksime de ni. Nenio tiel fetoras en ĉi mondo, kiel ĉi kaĵoluloj kaj flatuloj.

Poste, ludante kun doktoro Areskin ŝakojn, li diris al li malgaje, per malmilda voĉo:

— Mi ordonis al gubernatoroj kolekti monstrojn kaj diversajn aliajn kuriozaĵojn. Ordonu ŝrankojn prepari. Se mi dezirus kolekti monstrojn homajn ne laŭ aspekto de korpoj, sed laŭ monstraj karakteroj, ĉe vi, sinjoro Areskin, nenia loko por ili sufiĉus. Ili vagu en la tutpopola kuriozaĵkabineto, tie, inter bonaj homoj, ili estas pli rimarkeblaj, eble iun indas elĵeti for de nia planedo. Sed ili ja videblas ne tuj. Kiel ĉi leŭtenanto! Morti li por mi bezonas! Ĉu?

Al la ŝaktableto aliris Ievlev, Petro demandis lin:

— Ĉu ne estas tempo, Silvestro? Iru, diru al Apraksin, ni pensas, la tempo estas ĝusta.

El la halo, anhelante, venis Apraksin, reĝustigis la oblikve sidantan perukon, demande ekrigardis al la caro. Tiu kapjesis al li. Pretere, tra la vestiblo, trairis en surmetitaj manteloj kapitanoj Zmajeviĉ, Brown, Ivankov.

— Kun Dio, kun Dio! — grumblis Petro al Teodoro Matejeviĉ. — Tempas!

Li malgajnis la ŝakpartion al Areskin; sulkante la frunton, li

trairis la halon. Malsupre, en la manĝohalo, damoj kaj kavaliroj manĝis kuiritan salviandon kun fagopira kaĉo, trinkis bieron, rumon, vodkon. Trumpetoj kaj timbaloj, hobojoj kaj flutoj nun tondris en la vestiblo de la teretaĝo. Loko por ĉiuj samtempe ne sufiĉis, en asembleoj oni kutimiĝis vespermanĝi en du turnoj.

Rimarkinte Ievlev-on, aperintan en la halo, Petro demandis:

— Kaj ĉu por vi ne tempas iri al la loko?

— Post vi, Petro Aleksejeviĉ.

— Kial vi, Silvestro, antaŭe estis gaja, sed nun kvazaŭ muŝon glutis?

Ievlev ridetis, per la bluaj okuloj rekte ekrigardis al la caro.

— Parolu!

— Filinon mi fianĉinigis, Petro Aleksejeviĉ!

— Ĝi kiam do okazis?

— Hodiaŭ, Siro.

— Ĉu unu filinon?

— Unu.

Petro atente fiksrigardis al Ievlev, demandis:

— Kiu do estas la fianĉo?

— Flota markadeto Ivano filo de Ivano Rjabov.

La caro plu rigardis al Silvestro Petroviĉ per sia malpeza rigardo. Poste subite diris:

— Kaj aŭdis ni ankoraŭ pri intenco de kapitan-komodoro Kalmukov...

— Estis ĉi intenco, — respondis Silvestro Petroviĉ, — sed

ne renkontis ĝi respektivan aprobon de filino mia Vera Silvestrovna. Pro ĉiuj ĉi eventoj edzino mia ankaŭ ĝis nun en la dormoĉambro flarsalon flaras...

Petro, sulkante la nazon, kun subrido diris:

— Mi pensas, ŝi flarsalon ne flaris, kiam mi en la pasintaj jaroj en la bieno de la forpasinta kancelariestro ŝin por vi svatis. Evidinoj! Ĉu la nupto estos baldaŭ?

— Kiam ni revenos!

— Ĝuste, kiam ni revenos.

Kaj, kvazaŭ forgesinte pri Ievlev, li ree komencis paŝadi, elstariginte la ŝultron antaŭen, en la malpleniĝinta halo.

Ĉe mateniĝo ĉiuj de la Rusia floto maristoj, estintaj hieraŭ en la asembleo ĉe Ievlev, venis al Kronŝloto. Ĉi tie, en argila malalta kabano de la komandanto de la fortreso, dum pli ol horo kunsidis milita konsilio. La dudekan de majo, kiam leviĝis la suno, sur la ŝipo «Sankta Antonio» leviĝis la cara standardo kaj bojis kanono. Ambaŭ flotoj, la ŝipa kaj la galera, — ĉirkaŭ cent kvindek vimploj — sub krakado de tamburoj kaj kantado de trumpetoj ekiris al malproksima, malfacila kaj danĝera militiro. La ŝipoj kaj galeroj iris malrapide: flosanta glacio en la Finna golfo forte malfaciligis la moviĝon de la flotego. Blovis kontraŭaj ventoj. Iam subite ekturniĝadis neĝa kirlo, meze de tago ĉio griziĝadis, malklariĝadis, la ŝnuraro kovriĝadis per glacio, la galeroj kaj ŝipoj apenaŭ moviĝadis en timo de kolizio, streĉe kaj longe batadis signalaj sonoriloj, zumadis klarionoj.

General-admiralo Apraksin preskaŭ ne forlasadis la pobferdekon de «Sankta Antonio». Ĉi tie li manĝis senartifikan

militiran manĝaĵon, ĉi tie li dormis en metita por li fotelo. Maljuniĝinta, molaĉhaŭta, kun sakoj sub la helaj okuloj, li estis diranta al Silvestro Petroviĉ ĉe la fino de la preskaŭ monata mara vojaĝo:

— Tio estas racia, Silvestro Petroviĉ. Tempas fini. Estis batalo ĉe Lesnaja, estis granda Poltava viktorio, falis Viborgo, multon ni povas rememori, sed ni bezonas pacon. Ni la nian prenis — antikvan nian vojon de varengoj al grekoj, al nia maro eliris. Freneza ilia reĝo tion ne komprenas. Do ni devigu lin, elŝiru de li pacon per forto. Nun en nia floto iras dudek kvar mil homoj de infanterio — preobraĵenskanoj, semenovskanoj, de la Moskva regimento soldatoj, de la Vologda, grenadista — bonaj militistoj, batalspertaj. Kaj la floto estas reala, ne tiu, per kiu ĉe Perejaslavlo ni batalis. Devas ni fine frakasi la svedajn eskadrojn sur akvo, neniigi iliajn ŝipojn kaj eliri al Stokholmo, al ĉi forĝejo de malbono kaj malfeliĉo. Tie sinjoroj svedaj ministroj komprenu — tempas paciĝi, Rusio eliris al sia maro, neniu plu faros ĝin ree nur surtera potenco, en stepojn kaj arbarojn Rusujon ne enpelos...

Rapide aliris kapitan-komodoro Kalmukov, donis al Teodoro Matejeviĉ Apraksin kupran kun arĝento lornon, diris senhaste, per trankvila voĉo:

— Sveda granda floto maldekstre, sinjoro general-admiralo. Se direkti iomete pli maldekstre — de kabo Hanguto[158] estas iliaj ŝipoj. Kaj jen la flago de admiralo Wattrang.

Teodoro Matejeviĉ prenis la lornon, ne ekstarante de la fotelo, komencis fiksrigardi malproksimen, tien, kie etendiĝinte

158 Hanguto (ruse Гангут, svede Hangö udd, finne Hanko) — duoninsulo, ĉe kiu okazis granda marbatalo de la Norda milito en 1714 *(trad.)*

per potenca vico, staris batalpretaj svedaj ŝipoj, barintaj la vojon al la rusaj.

Egalmezure bruadis, ruliĝadis, murmuregadis la maro.

Sub radioj de la matena suno super la duoninsulo Hanguto svenis malpeza, travidebla nebulo...

4. Hanguto

La milita konsilio kunvenis sur roka bordo, sur nudaj, varmigitaj de la suno ŝtonoj. Generaloj kaj admiraloj sidis kun la vizaĝoj, turnitaj al la maro, mallarĝigadis la okulojn al brilo de la akvo sub la suno, fiksrigardadis malproksimajn, senmovajn svedajn ŝipojn. Petro, laciĝinte de disputoj, estis silente transŝutanta el unu mano en la alian ŝotron, kunŝovadis la brovojn, pensadis. Post longaj plendoj de brigadestro Volkov li tute koleriĝis, ĵetis la ŝtonetojn en la akvon, leviĝis:

— Sufiĉas, sinjoroj konsilio, babilaĵojn babili. Certe la svedoj komprenas, kien ni per la unuigita floto iras kaj por kio ni tion faras. Ĝuste tial ili ne lasas al ni trairi. Nu, sed ni tamen trairos. Antaŭ nelonge mi mezuris la duoninsulon en ties mallarĝo. Nur mil ducent klaftojn. Ne granda estas trenvojo. El vilaĝeto Njuĥĉo ĝis Ladogo estis pli malfacile, sed tamen ni liveris la fregatojn, — ĉu vi memoras, Silvestro?

Ievlev kapjesis — jes, mi memoras.

— Ni scias, kiel ĉi laboron labori. Ni elĵetiĝos sur tiun flankon subite-neatendite, batos al la malavano de la svedo, timigos per sabotado kaj movos la grandan floton. Tiam ili provu trovi. Kaj nun mi ordonas sterni lignan vojon por ŝipoj,

senprokraste faligi pinojn, ĉarpentistojn, kiuj estas sur niaj ŝipoj, nomumi dekestroj, soldatojn kaj matrosojn ĉiujn per gigoj transporti ĉi tien...

Apraksin singarde rimarkis:

— Nur la svedoj ne eksciu, Siro. Loĝantoj lokaj...

— Loĝantoj, loĝantoj! — interrompis Petro. — La loĝantojn necesas atenti. Ili sidu en la domoj, neniun lasi eliri...

Kaj li ordonis:

— Jaguĵinskij, skribu: konstruos la trenvojon subadmiralo Ievlev...

En la sama nokto sur la duoninsulo, sur la granda tero, sur arbaraj insuletoj matrosoj kaj soldatoj komencis faligi arbojn. Lignofajrojn ili ne bruligis, manĝaĵon ne kuiris, nutris sin per biskotoj kaj per tio, kion oni liveradis de la ŝipoj. Senĉese ŝrikadis segiloj, centoj da hakiloj ronĝadis freŝajn trunkojn de pinoj. La trabojn per ŝnuregoj oni altrenadis al la loko de la trenvojo, kunigadis per lignonajloj; preparadis rulilojn en granda kvanto, por tuj levi sur la trenvojon kelkajn ŝipojn. Sur la tuta longo de la ŝipa vojo Silvestro Petroviĉ ordonis enfosi vinĉojn, por faciligi la nekredeblan laboron de trenado de ŝipoj sen ĉevaloj.

Sed ĉe mateniĝo de la sekva tago Petro, subite elirinta el arboj, vokis Ievlev-on, kondukis lin post si al la okcidenta bordo de la duoninsulo. Kun la caro estis Apraksin, Weide, Golicin, ankoraŭ iuj nekonataj oficiroj.

— Kio estas? — demandis Silvestro Petroviĉ nelaŭte Apraksin-on.

Tiu respondis malgaje:

— Eksciis la svedoj pri via trenvojo. Oni diras, iu spiono raportis pri nia plano al ilia admiralo...

Petro paŝis rapide, ĝibetiĝinte, skuadis la kapon, koncentrite pensadis pri io. Kaj kiam ili eliris al la kviete plaŭdanta maro kaj ekvidis eskadron de subadmiralo Ehrenschiöld kun «Elefanto» ĉekape, Petro subite gajiĝis, plenigis la pipon per tabako, eksidis sur arbostumpon kaj, ruze palpebruminte al Apraksin, demandis:

— Ĉu vi vidas, Teodoro Matejeviĉ?

— Mi vidas, Siro. Ne lasos ili al ni transtreni la ŝipojn.

— Sed ĉu tio por ni estas tiom amara?

Apraksin pensis, interŝanĝis rigardojn kun Ievlev, respondis senhaste:

— Probable, ke tio eĉ estas profita por ni. Nun Wattrang iĝis multe pli malforta. Li disigis la floton — kaj ne tiom fortikas. Ĉu tiel, Silvestro Petroviĉ?

— Ĉi tie laborojn necesas plu daŭrigi, — diris Ievlev, — Ehrenschiöld esperu nin ĉe transtrenado kapti. Sed ni laboros nur por aspekto. Kaj koncerne de la eskadro de Wattrang, do ĝin, se okazos senventeco, sen ajna malutilo eblas ĉirkaŭiri pli altmare. Galeroj sukcese per remiloj tion faros...

Petro leviĝis, proksime aliris al Ievlev, per juna voĉo diris:

— Ehrenschiöld-on ni fermos en kaptilo. Kaptante, li mem iĝos kaptita. Tiele, fraĉjoj. Tiele, admiraloj, sinjoroj miaj karaj. Kaj nun devas ni la galeran floton iom firmigi per oficiroj. Pli da lertaj homoj tien direkti, ĉar la galera floto tion fari devos.

...En sufoka vespero la 25-an de julio general-admiralo Apraksin en akompano de Ievlev, komandanto de la avangardo general-leŭtenanto Weide, komandanto de la ariergardo princo Golicin, brigadestro Volkov kaj general-majoro Buturlin estis kontrole ĉirkaŭirantaj la ŝipan floton. De aliaj ŝipoj «Sanktan Antonion» atingis malklara «hu ra», tambura rulado, sonoj de signalaj fajfiloj. Estis kompreneble, ke sur pobkasteloj de ŝipoj de la rusa milita floto estis okazanta io solena, eĉ majesta kaj sendube koncernanta tiun militan laboron, kiu estis atendata de ĉiuj kun maltrankvilo, fiero kaj firma kredo pri nepre venka fino de la malfacilega militiro, honore plenumita de la tuta flotego de ŝipoj, fregatoj, transportiloj, brigantinoj, galeroj, brigoj, velgaleroj. Ĉio ĉi estis komprenebla sur «Sankta Antonio», sed kio nome estis okazanta sur aliaj ŝipoj — neniu bone sciis, kaj oficiroj kaj matrosoj dume nur avide fiksrigardadis kaj streĉite aŭskultadis, duonvoĉe, aŭ eĉ flustre farante supozojn kaj divenojn.

Je la deka horo de vespero tri velboatoj aliris la ĉefŝtuparon de «Antonio». Kapitan-komodoro Kalmukov en blankaj gantoj, kun skarpo sur la ŝultro renkontis la gastojn sub tambura rulado. Tuj kiam Teodoro Matejeviĉ surpaŝis la ferdekon de la ŝipo, sur la topmasto leviĝis standardo: «general-admiralo estas ĉi tie».

Facile portante sian korpulentan korpon, Teodoro Matejeviĉ, akompanata de generaloj kaj admiraloj, leviĝis sur la pobkastelon, kie jam liniiĝis la oficiroj, silentis iom kaj per hejma, ne solena, laca voĉo prononcis:

— Sinjoroj oficiroj! Laŭ supozo de la dispozicio la rezulto

de la batalo estos decidita ne per velŝipoj de la ŝipa floto, sed per galeroj kaj velgaleroj, ĉar al vento ni ne esperas, sed bravaj remistoj sian devon fidele plenumos. Kaj ĉar sur galeroj kaj velgaleroj ni havas mankon de bonaj oficiroj, do mi petas vin jam nun dum kvin minutoj decidi, kiuj deziras iri sur la galeran floton por ĉi utila afero. Post kvin minutoj da tempo, laŭ mia demando, decidintoj iri al galeroj, bonvolu eliri el la linio je du paŝoj antaŭen...

Kaj, forturniĝinte al siaj generaloj kaj admiraloj, Apraksin komencis kun ili pri io mallaŭte konversacii. La oficiroj de «Sankta Antonio» staris senmove. Ĉiu el ili tuj decidis, kiel li devas agi, kaj ĉiuj nun atendis la lastan demandon de la general-admiralo.

Estis plena silento, nur aŭdiĝis egalmezura plaŭdado de la maro kaj iam subite ekkriadis mevo. De la bordo venadis odoro de putrantaj algoj. Rjabov rimarkis, ke sur Apraksin kaj sur aliaj generaloj kaj admiraloj estas metitaj ne ordinaraj uniformoj, sed kaftanoj el alka ledo — batala vesto, kiun oni portadis en la rusa floto anstataŭ pezaj maŝkirasoj kaj armaĵoj.

— Kvin minutoj pasis! — per la sama hejma voĉo diris la general-admiralo. — Kiu deziras transiri al la galera floto — du paŝojn antaŭen el la linio.

La oficiroj orde, sen sekundo da prokrasto, faris la ordonitajn du paŝojn kaj kun tondro almetis la kalkanumojn. Apraksin silentis iom, malfermis tabakujon, ŝovis en la nazotruon pinĉaĵon da tabako — li nun en maljuneco komencis flari tabakon, kiam maltrankvilis, kaj, turninte sin al Ievlev, diris:

— Jen, vidu, kiel! Nun estas nova zorgo — kiun lasi

komandi «Antonion».

Poste li riverencis ĝiszone al ĉiuj starantaj senmove oficiroj:

— Dankon, sinjoroj flotaj oficiroj! Tiun ĉi vian servon mi bone memoras kaj ne forgesos en necesa tago.

Sur la pobkastelo tondris «hu ra».

Teodoro Matejeviĉ, vigligante sin kaj superante pezan lacon de la tuta militiro kaj de la lastaj malfacilaj tagoj, ekiris al la ŝtuparo. Sed la vojon al li sentime baris matrosoj; li trapuŝiĝadis inter ili, ŝajnige severe insultante:

— Iru, iru for de la vojo, for, vi min dispremos, stultuloj, ĉu vi ne vidas, ke estas maljuna via general-admiralo. Neniun mi prenos! Kaj ne algluiĝu, kaj la manojn ne tuŝu, jen kiaj rapiduloj! Mi scias, scias, sur ĉiuj ŝipoj oni la samon diras, sed sur galeroj ankaŭ sen vi homoj sufiĉas...

La matrosoj finfine disiĝis, premante unu la alian, tamburoj ĉe la ŝtuparo batis ruladon, la standardo de la general-admiralo ekrampis malsupren. En la velboato general-leŭtenanto Weide demandis Ievlev-on:

— Per kio klarigeblas, mia amiko, ĉio tio, kion ni ĉi tie ĵus observis?

— Ĝi klarigeblas nur per deziro fini la damnitan militon! — respondis Ievlev. — Nun tiel okazis, ke ne estas en la tuta floto matroso, nek soldato, kiuj ne komprenus, ke ne estos kvieto kaj por Sankt-Piterburgo, kaj por aliaj lokoj — de la Ladoga lago ĝis Arĥangelsko, de Pskovo ĝis Novgorodo, — ĝis ni faros viktorion super la sveda floto, kaj ju pli frue tio okazos, des pli bone...

Weide silentis, suĉante la pipon, kraĉadis en la akvon.

En la sama nokto Ivano Ivanoviĉ Rjabov sur kuriera boato venis sub komandon de kapitan-komodoro Zmajeviĉ en lian taĉmenton de velgaleroj kaj galeroj. Kalmukov ricevis nomumon en la duan taĉmenton de galeroj.

Ĉe Zmajeviĉ estis pasigantaj tempon du nekonataj oficiroj, morne aŭskultis rezonadon de la kapitan-komodoro.

— Ni vivas malfacile, kruele, — estis parolanta tiu. — Pli kruele ne eblas. Mi revenas de la maro en Paradizon[159] — Sankt-Piterburgon por ripozo, unu aŭ du tagojn mi trasuferas, kaj pensas, ne, ĉe ni ja estas pli bone. Spiri estas pli libere, ja estas mara vento. En Sankt-Piterburgo nur katenoj tintas. Laŭ stratoj laborulojn oni pelas — en katenoj. Kaj vere — pro ĉi Paradizo el naŭ kortoj en Rusujo unu homon oni elprenas. Ne estas ŝerco. Kaj devas tiu homo veni kun sia ĉarpentista, aŭ lignaĵista, aŭ ia alia metia ekipaĵo. Kaj por dekestro estas ordonite havi kaj ĉizilon, kaj mortezilon, kaj skrapklingon, kaj borilon, kaj segilon. Kaj ĉio ĉi, sinjoroj miaj, estas kara, por ĉio pagi necesas, kaj ankaŭ panon ĝis la loko por laborulo aĉeti. Kie tion preni?

La gasta oficiro tiris sin, diris kun suspiro:

— Ho Dio! Kuriozaĵojn, monstrojn, raraĵojn ni kolektas, kaj ĉi tie estas milito, kaj ĉi tie estas Paradizo, kaj ĉi tie estas

159 Paradizo — tiel nomadis Petro mem Sankt-Peterburgon en la komenco de ĝia konstruado. «Sankt-P*i*terburgo» ne estas tajperaro, en tiu tempo la nomo de la urbo estis tia laŭ la nederlanda formo de la nomo Petro — Pieter. Poste «Piter» iĝis popola nomo de Sankt-Peterburgo, kaj tiu nomo ĝisvivis la nunan tempon, kvankam la urbo ŝanĝis sian nomon laŭ la germana formo — Peter *(trad.)*

«vorto kaj afero»[160]! Kiam por la popolo estos pli facile?

Dum la konversacio ili vespermanĝis likvan kaĉon, almanĝis biskoton. La kaĉo odoris je putraĵo, la alia oficiro-gasto insultis:

— Je Dio, mi de la komenco mem de la Rusia ŝipa floto servas, sed ne memoras, ke oni bonan grion en la floto ricevus. Ĉiam humidan, kaj amaran, kaj putran. Penas, penegas sinjoroj komercistoj — helpas al ni la caran servon plenumi...

Forakompaninte la gastojn, Zmajeviĉ eksilentis por longe — fiksrigardis siluetojn de foraj svedaj ŝipoj, fiksaŭskultis svedajn signalojn. Ĉi tie, sur la velgalero, matrosoj estis kuŝiĝantaj dormi, du voĉoj kantis kanton, nemalproksime oni akorde ridis, aŭskultante fabeliston.

Ivano Ivanoviĉ baldaŭ ekdormis en la kajuto sub varma ŝafa peltjako, kaj Zmajeviĉ turniĝadis, suspiradis kaj ree leviĝis laŭ la ŝtuparo sur la pruan trapasejon. Tie li pasigis la tutan mallongan nokton, fiksaŭskultante kaj fiksrigardante, pensante — ĉu estos ventomanko, aŭ leviĝos vento. Sed estis plena senventeco. Frumatene sur la velgaleron venis kuriero kun mallonga ordono. Zmajeviĉ elaŭskultis la leŭtenanton, kapjesis, malleviĝis en la kajuton, surmetis novan uniformon, strikte zonis sin, prenis en la manon trikornan ĉapelon, Ivano Ivanoviĉ, vekiĝinte, turnadis la kapon, demandadis:

— Kio? Kio? Ĉu komenciĝis?

Sur velgaleroj tamburoj batis ruladon, matrosoj sidiĝadis sur benkojn, kraĉadis sur la manojn, provadis remilojn. Ĵus

160 Vd. noton en la unua ĉapitro de la dua parto: tiuj vortoj estis signalo por aresto de homo, akuzata pri ŝtatperfido *(trad.)*

leviĝinte, la suno komencis rosti, la akvo kuŝis kiel glata, malbrila spegulo, la svedaj ŝipoj, certe, ne povis ekmoviĝi de sia loko. Ĝuste al tio estis kalkulita la dispozicio de la milita konsilio.

— Ni traŝiriĝos en la Abajn[161] ŝerojn pli altmare ol la svedoj, — diris Zmajeviĉ, — ĉu vi komprenis? Ni havas galerojn, ili — ŝipojn. Por ili ĉe tia senventeco restas unu afero: atendi kaj al Sankta Brigita preĝi.

Rjabov rigardis en lornon. La svedoj, rimarkinte moviĝon de la galera floto, irinta ekster atingebleco de iliaj kanonoj, mallevis remboatojn, penis treni siajn ŝipojn. Estis videble, kiel streĉiĝas fadenoj-ŝnuregoj, kiel remas svedaj matrosoj. Sed la pezaj ŝipoj staris senmove, kvazaŭ kunfanditaj kun la hele brilantaj, pezaj akvoj de la golfo.

— Laboru, fraĉjoj, laboru! — per raŭkiĝinta voĉo petadis Zmajeviĉ. — Laboru, amikoj, ne avaru! Ĉio nun estas en nia rapideco, kuraĝo, lerteco!

De la remistoj verŝiĝis ŝvito, galera knabo — kuiristo — ĵetiĝadis kun sitelo kaj kruĉo — trinkigadis homojn el siaj lertaj manoj. Ferdekestroj el kuvoj priverŝadis remestrojn per eksterŝipa varma, sala akvo. En la plej kvieta senventeco fore aŭdiĝis batoj de timbaloj, ululado de grandaj tamburoj, komandoj:

— Remilojn — akven! Remilojn — supren! Remilojn — akven! Remilojn...

La velgaleroj iris glate, per kolumno, kaj tiel rapide, ke eĉ

161 Abo (svede, nun finne Turku) — urbo kaj haveno sud-okcidente de Finnlando *(trad.)*.

en la plena nun senventeco la pobaj flagoj flirtis kvazaŭ en ŝtormo.

La svedoj provis pafi, sed la kuglegoj faladis tiom malproksime de la traŝiriĝinta rusa avangardo, ke post kelkaj salvoj admiralo Wattrang ordonis ĉesigi la pafadon.

Post tagmezo Zmajeviĉ diris al Ivano Ivanoviĉ:

— Jen li — sinjoro subadmiralo Ehrenschiöld. Atendas nin de la bordo, de la trenvojo. Tien li siajn kanonojn turnis. Do, sinjoro subadmiralo, ni salutos vin. Se ne hodiaŭ, do morgaŭ...

Tridek velgaleroj kaj galeroj de la rusa floto ĵetis ankrojn antaŭ la eskadro de la svedoj.

Remistoj sur la velgalero de Zmajeviĉ kuŝis sur la ferdeko kaj la benkoj, kvazaŭ mortintaj. Multaj havis la polmojn frotitaj ĝis sango, iuj brue, stertore spiregis, unu remestro ĉiam verŝadis sur sin akvon — sitelon post sitelo, plendis, ke la internaĵo bolas, brulas kiel fajro. Manĝi neniu povis...

— Malfacila estos afero! — diris Zmajeviĉ al Rjabov, kiam ili ĵetis la ankron. — Ehrenschiöld estas saĝa, nenion eblas diri, havas kapon sur la ŝultroj la subadmiralo. Ne eblas lin ĉirkaŭiri, diablon... Kaj de la trenvojo li nin atendis, kaj ĉi tien rigardis...

Ivano Ivanoviĉ, starante sur la trapasejo, atente fiksrigardis la situon de la eskadro de Ehrenschiöld. En mallarĝa fiordo la sveda subadmiralo tiel metis siajn ŝipojn, ke ili vere lasis nenian eblon ataki la malavanon. La flagŝipa «Elefanto» staris flanke al la rusaj velgaleroj, por pafi per ĉiuj kanonoj, kaj la galeroj staris prue por pafi per pruaj kanonoj. Malantaŭ la eskadro videblis dronigita barĝo kaj ankoraŭ ŝipo kun kanonoj,

direktitaj al la loko de la supozata trenado de ŝipoj.

— Nu? — demandis Zmajeviĉ.

— Vere, estas malfacila afero! — konsentis Rjabov. — Kvazaŭ fortreso...

— Jen, fortreso. Ni devos ne alie ol per ŝipatako la viktorion elŝiri, kaj iliaj ŝiprandoj estas altaj. Havos ni malfeliĉon...

En krepusko al Zmajeviĉ sur boateto venis Kalmukov. Ili fumis pipojn, silentis, pensis. En la sveda eskadro brilis fajroj, de tie aŭdiĝis sonoj de klarionoj, kantado de trumpetoj. Poste Ehrenschiöld kunvenigis militan konsilion — videblis, kiel al lia ŝipo ekiris boatoj de ĉiuj ŝipoj de la eskadro.

— Estas mallarĝe — jen kio estas malfacila, — diris Kalmukov. — Per pli ol dudek galeroj en linio ne eblos ataki, kaj eĉ tiel estas tro malvaste — intertuŝe. Ankoraŭ la malavano ne estas sekura. Se ventomanko ĉesos, admiralo Wattrang nin per sia ŝipa floto tuj al la vosto atakos, tiam ni dancos. Kaj oni aŭdis, de Abo galera floto de subadmiralo Taube por ilia helpo ekiros, aŭ ekiris hodiaŭ. Estas unu espero — rapide Ehrenschiöld-on frakasi plene, por ke li ne rekonsciiĝu, returniĝi kaj esti pretaj al aliaj hazardaĵoj. Ĉu mi ĝuste diras, sinjoro Zmajeviĉ?

La kapitan-komodoro kapjesis, konsentis:

— Alie ne eblas fari ĉi laboron...

Kaj li aldonis kun suspiro:

— Laboros ni morgaŭ, vere ŝvitos...

Matene la observisto sur la velgalero de Zmajeviĉ ekvidis la avangardon de la granda galera floto. Post la ŝipoj de generalo

Weide iris galeroj, duongaleroj kaj velgaleroj de la centra eskadro sub granda flago de general-admiralo Apraksin kaj fine — la ariergardo de Golicin kun lia eskadro. La tuta galera rusa floto traŝiriĝis, uzinte tion, ke admiralo Wattrang, irante al kuniĝo kun admiralo Lillje, malfermis la galeran ŝanelon.

Sur la eskadro de Zmajeviĉ oni kriis «hu ra».

Artileriistoj de Weide svingadis trikitajn ĉapojn, skovelojn, sabrojn, la antaŭe kvieta fiordo ekzumis, kvazaŭ arbaro dum uragano. Knarado de galeraj remiloj en remilingoj, komandaj vortoj, kuraĝaj elkrioj en paroltubojn, frapoj de hokstangoj, tondrado de pezaj matrosaj botoj, metala grincado, insultado, ridado — ĉio samtempe kuniĝis en unuecan, potencan kaj gajigan vigliĝon, kia ĉiam fariĝas ĉe kuniĝo de grandaj militistaj amasoj. La plej granda parto de la laboro, anticipanta batalon, estis finita, kaj ĉiuj homoj sur ĉiuj ŝipoj de la floto komprenis tion, same, tamen, kiel ankaŭ sur la ŝipoj de Ehrenschiöld oni komprenis la venantan teruran danĝeron: tie estis granda silento. Ehrenschiöld ordonis al la pastro de la eskadro fari diservon.

En la antaŭtagmanĝa tempo sur la galeron de Zmajeviĉ leviĝis la general-adjutanto de Petro Jaguĵinskij. Li estis en mallonga kaftano el alka ledo, kun spado, en blankaj gantoj. Lia bela vizaĝo estis pala, la okuloj ekscitite brilis.

— Ni devas komenci la aferon, — diris li, etendante la manon al la kapitan-komodoro. — Ĉu vi estas preta, Zmajeviĉ? Se preta, ordonu iri al «Elefanto» sub blanka flago.

Matrosoj levis la ankron, la remestroj ekpremis la remilojn. Jaguĵinskij, Zmajeviĉ kaj Rjabov staris en la prua trapasejo de la ŝipo. La galero ĉiam pli malproksime foriradis de la rektaj

linioj de la rusa floto, ĉiam pli proksima iĝadis la sveda flagŝipo. Jen jam iĝis klare distingeblaj kanonaj malfermitaj paftruoj, jen eblis distingi amasiĝintajn ĉe la ŝtuparo svedajn oficirojn, jen iĝis videbla subadmiralo Ehrenschiöld mem — senkapvesta, en ore brodita uniformo. En distanco de unu ŝipa longo de «Elefanto» Zmajeviĉ ordonis levi la remilojn. Tuj estiĝis plena silento, tia silento, ke Rjabov aŭdis, kiel gutas akvo de la remiloj en la maron.

— Mi aŭskultas vin, rusoj! — laŭte, klare en la germana prononcis Ehrenschiöld.

Li staris antaŭ sia sekvantaro, liaj manoj estis kunmetitaj sur la brusto, lia malhela vizaĝo havis malmildan esprimon.

— Sinjoro subadmiralo Ehrenschiöld! — per laŭta voĉo, sed tre ĝentile ekparolis Jaguĵinskij. — Laŭ ordono de mia monarĥo mi havas honoron proponi al vi kapitulaci sen ajnaj kondiĉoj, transdoninte sin al arbitro de la venkinto. Vi mem bonvolas vidi, kia estas kontraŭulo antaŭ vi, kaj ne povas ne kompreni, kio atendas viajn ŝipojn okaze de batalo. Kia estos via respondo?

Centoj da svedoj staris sur trapasejoj de la galeroj, ĉirkaŭis «Elefanton», aŭskultis, penante ne diri eĉ unu vorton. Ehrenschiöld respondis senhaste, mallonge:

— Ne, ni ne kapitulacos.

Jaguĵinskij ŝajnigis, ke li ne distingis. Ehrenschiöld ripetis:

— Mia eskadro ne kapitulacos! — diris Ehrenschiöld. — Ĉu nun vi aŭdas?

La general-adjutanto kuntiris la brovojn, avertis:

— En batalo neniu petu pri indulgo!

Ehrenschiöld fiere levis la kapon, respondis laŭte:

— Mi neniam kaj de neniu petis indulgon!

Kaj, abrupte turniĝinte, malaperis en amaso de la sekvantaj oficiroj. Tuj sur «Elefanto» leviĝis topmastaj flagoj: «al batalo prepariĝi!»

Ekzakte je la dua horo posttagmeze sur la galero de Apraksin estis levita blua flago, signifanta komencon de batalo, kaj tuj pafis kanono. Kapitan-komodoro Zmajeviĉ svingis blankan tukon, kaj en la sama momento lia eskadro, pafante dum irado per ĉiuj siaj pruaj dudek tri kanonoj, impetis al la svedoj. Ehrenschiöld silentis, sed la faŭkoj de la svedaj kanonoj persiste rigardis al la rapidantaj rusaj galeroj kaj velgaleroj.

— Kial do li? — demandis Rjabov. — Ĉu li ne pafos?

— Li pafos! — per raŭkiĝinta voĉo respondis Zmajeviĉ. — Li atendas.

La svedoj batis nur tiam, kiam la eskadro de Zmajeviĉ aliris je duona distanco de pistola pafo. Ili pafis per mitrajlo per ĉiuj kanonoj. En la morta senventeco de la varmega tago peza pulva fumo nebuligis la tutan fiordon. Zmajeviĉ tuj iĝis vundita kaj, kaptinte Rjabov-on je la ŝultro, siblis en lian orelon, kion kaj al kiu ordoni. El lia buŝo fluis sango, li kraĉadis ekster la ŝiprandon kaj ree raŭkadis al Ivano Ivanoviĉ, kiel agi. En acida pulva fetoro sur la ferdeko de la velgalero silente mortadis remestroj, ferdekestroj, artileriistoj. Rjabov ĵetiĝis al kanono, enigis ŝargon, enpremis meĉon. Li vidis, kiel la kuglego batis apud la ŝtuparo de «Elefanto», sed li tuj perdis la konscion kaj

rekonsciiĝis ne baldaŭ, nur tiam, kiam la eskadron de Zmajeviĉ jam estis ĉirkaŭirantaj galeroj de la centra eskadro, ordiĝintaj en du linioj.

— Jen, viva! — siblis apud Ivano Ivanoviĉ Zmajeviĉ. — Tio, frato, estas kontuzo, vi ne estas vundita, mi jam rigardis. Ĉu vi min aŭdas aŭ tute surdiĝis?

— Aŭdas! — per neobeanta lango respondis Rjabov.

— Jen, aŭdas. Kaj la batalon vidas?

— Vidas. La centro ekiris.

— Ja ekiris, sed ankaŭ ili ne eltenos. Vidu, kiel oni al ili pafas. Ho, pafas...

Li ankoraŭ kraĉis ekster la randon, vokis al si per la fingro maljunan, fulgokovritan matroson, ordonis fari purigon — al batalo.

— Fini devos ni, — diris li flustre al Rjabov. — Ni dume iomete reviviĝos, retrovos spiron kaj ree komencos labori...

Sur la galero anstataŭ la pereintaj remestroj aperis novaj, venis juna ferdekestro, du kanonistoj. La mortintoj, kovritaj per flago, kuŝis apud la poba trapasejo. Sur boateto venis kuracisto, pansis Zmajeviĉ-on, ordonis al li trinki varmegan sbitenon, ne moviĝi, ne paroli. La kapitan-komodoro ne aŭskultis lin — rigardis al la maldekstra flanko de la svedoj, al galero «Trapan», kun kiu en ŝipatako kunkroĉiĝis velgaleroj de la dua linio de la centra eskadro. De ĉi tie videblis, kiel la defendantoj kaj la atakantoj amasiĝis ĉe unu rando de «Trapan», kiel la sveda galero komencis kliniĝi kaj kiel, ĉerpinte akvon, dronis. Fora mallonga kriego de la dronantoj atingis Ivanon Ivanoviĉ-on, li por momento fermis la okulojn, kaj kiam li ree ekrigardis

en tiu direkto — la atakaj ŝipoj jam estis deirantaj kaj sur la loko de «Trapan» nur kvazaŭ bolis la maro.

La dua linio de la centra eskadro tiutempe per densa ordo iris al la fronto de la svedaj ŝipoj. Pafado de kanonoj de la kontraŭulo komencis malfortiĝi, eĉ «Elefanto», la flagŝipo de Ehrenschiöld, rebatadis malpli ofte kaj kvazaŭ sen deziro. Kaj la rusaj galeroj de la dua linio kaj la eskadro de Kalmukov, ankoraŭ ne estintaj en la batalo, per potenca pafado detruadis ŝnurarojn, dissplitadis pruajn trapasejojn de svedaj remŝipoj. Ekbrulis finfine ankaŭ «Elefanto» — densa rufa fumo ekrampis de la pobo, sur la pobferdeko aperis langoj de flamo.

De Apraksin al Zmajeviĉ venis sendito, ordonis senprokraste iri por helpo al la eskadro de Kalmukov. Nun Zmajeviĉ komandis ne dudek tri galerojn kaj velgalerojn, sed nur dek naŭ, la ceterajn kvar ne eblis konduki kun si en la batalon — tie pereis kaj la remestroj, kaj la ferdekestroj, kaj la ŝipatakaj soldatoj.

Elaŭskultinte la ordonon, la kapitan-komodoro ree svingis la tukon. Batis timbaloj, la remestroj ekpremis la remilojn. Ivano Ivanoviĉ almetiĝis al la kanono, direktadis ĝin, por pafi ĝuste. La velgalero per saltoj, facile iris rekte al «Elefanto», kvazaŭ intencis rami ĝin. Aliaj velgaleroj de Zmajeviĉ moviĝis apude, iliaj pruaj kanonoj pafadis al la flagŝipo de la svedoj. «Elefanto» ankoraŭ pafis per tri flankaj kanonoj, skuiĝante per la tuta korpo, kaj eksilentis por eterne. La galeroj de Kalmukov ĉirkaŭis la ŝipon de Ehrenschiöld, ŝipatakaj soldatoj kroĉiĝadis per hokoj al altaj ŝiprandoj, almetadis ŝtuparojn, sed la svedoj pafadis desupre per fusiloj, hakadis per sabroj, pikadis per mallongaj lancoj.

— Pafu! — ordonis Ivano Ivanoviĉ.

La kanono batis, mitrajlo kun ŝriko forbalais dekduon da matrosoj de «Elefanto», rufa soldato-preobraĵenskano finfine almetis eskalon, la rusoj kure, lerte, rapide movante la manojn, ekgrimpis supren — hakbatali sur la pobkastelo. Ivano Ivanoviĉ vidis, kiel de alia galero de Kalmukov oni almetis ankoraŭ du eskalojn, kiel la svedoj foriris de la ŝiprando, prematajn de ŝipatakaj grupoj de preobraĵenskanoj, semenovskanoj, grenadistoj, vologdanoj...

Kaj sur la ŝtuparo de la flagŝipo, kun spado en la mano, tuta kovrita per sango, brulvundita kaj elturmentita, ankoraŭ batalis subadmiralo Ehrenschiöld, batalis per lastaj fortoj, ne sciante, ke lia ŝipo jam estas kaptita, ke la oficiroj de lia sekvantaro jam kapitulacis, ne sciante, ke rusa kapitan-komodoro Kalmukov jam deŝiris la silkan poban flagon de «Elefanto» — oran krucon sur blua kampo.

Je kvina horo posttagmeze sur la galero de Apraksin tamburoj batis «malalarmon». La batalo, daŭrinta tri horojn, finiĝis per plena venko de la rusaj maristoj. Sur la galeroj kaj velgaleroj klarionistoj, apoginte siajn flankojn per la pugnoj, ludis «ripozon». Matrosoj kaj ŝipestroj, soldatoj kaj generaloj, admiraloj kaj brigadestroj lavis sin per mara akvo, avide trinkis el ĉerpiloj, bandaĝis vundojn, rememoradis pereintajn heroojn, miradis kaj ĝojis pri tio, ke ili estas vivaj. La taga varmego ĉesis, de la maro ekblovis facila vento.

Ivano Ivanoviĉ sur sia ŝipo faris nomvokadon de la homoj, markis en folio per krucoj pereintojn. Sub venteto, sterninte sub sin drelikon, spirante malglate, kun raŭko, dormis vundita Zmajeviĉ.

Rjabov eksidis sur benkon, suspiris, enpensiĝis. En liaj oreloj ankoraŭ estis zumado, la bruston premis pulva brulodoro. Kaj estis strange, ke la batalo finiĝis, ke la svedaj ŝipoj staras preskaŭ en la sama ordo, kiel antaŭ la komenco de la batalo, sed nun sur ili flirtas ne bluaj flagoj, sed aliaj — rusaj, de Sankta Andreo, kaj ekde nun tiuj ŝipoj apartenas al la rusa Balta floto.

5. Survoje hejmen

Antaŭ krepusko de la sekva post la batalo tago Luko Aleksandroviĉ en bruldifektita, ŝvita kaj fulga kaftano, kun fermiĝantaj pro laco okuloj revenis al si sur «Sanktan Antonion». Kiam li eniris, Spafariev per speciala frizilo estis pufiganta por si la buklon sur la frunto. La kapitan-komodoro iom staris silente en la pordo de la kajuto, diris poste kun suspiro:

— Supozis mi dum la batalo: pereos Kalmukov, el tiu afero sekvos sola ĝojo — el palacoj paradizaj aŭ inferaj vidos mi nepre, kiel oni vin, matroso Spafariev, senkompate vipos. Kaj ne estos por vi en la mondo protektanto!

Servosoldato Spafariev reĝustigis la buklon sur la frunto, demetinte la dikan kruron, eldiris:

— Homo proponas, Dio disponas. Vi ne pereis en la batalo, kaj mi ne estos vipita.

Kaj li gratulis sinjoron Kalmukov-on pri la viktorio super la svedoj.

— Iru for al diablo! — koleriĝis Kalmukov.

La servosoldato prenis sian frizilon, turniĝis ankoraŭ antaŭ la spegulo, promesis:

— Probable, nun en Paradizo oni honore heroojn renkontos.

— Vin speciale!

— Kaj kial min ne honori? Ĉu mi laŭ mia volo en la batalo ne estis? Kaj kiu el tie vidas — kiu estis, kaj kiu ne estis, kiu pafis, kaj kiu en ĉagreno sian vicon atendis? Amorantinoj pri tio neniom estas informitaj...

— Ĉu vi foriros de ĉi tie? — kriis la kapitan-komodoro.

Spafariev finfine foriris. Kalmukov malvestis sin, lavis, kuŝiĝis, eĉ ekdormetis, sed bone ekdormi ne sukcesis. General-adjutanto Jaguĵinskij ordonis senprokraste prepari kajuton por general-admiralo Apraksin, por cara kaptito subadmiralo Ehrenschiöld, por subadmiralo Ievlev kaj aliaj ceteraj ranguloj.

— Kaj kion novan oni tie aŭdis? — oscedante, demandis Kalmukov.

— Nova estas tio, ke la tuta sveda floto foriris el ĉi lokoj al si — gardi Stokholmon kontraŭ nia elŝipiĝo.

Jaguĵinskij same oscedis, etendis antaŭen la fortikajn piedon en novmanieraj, kun kalkanumetoj ŝuoj, tiris sin per la tuta korpo, ekparolis per laca voĉo:

— Batite, tamen, estas multe da popolo. Hodiaŭ oni kalkulis: mortintaj cent dudek sep, kaj oficiroj el ili ok. Vunditaj tricent kvardek unu, kaj oficiroj el ili dek sep. Ĉe la svedoj mortintoj estis kalkulitaj tricent kvindek du. Pli ol tri cent estis kaptitaj...

Luko Aleksandroviĉ, ĝemante, surmetis la paradan

uniformon, kunvokis oficirojn fari ordonojn. Dum oni preparis la kajutojn, venis nokto. La estraro plu ne venadis, anstataŭ ĝi venis Ivano Ivanoviĉ Rjabov, tiom fulga kaj ĉifona, ke Kalmukov unue eĉ ne rekonis la markadeton.

— Kio do pri niaj gastoj? — demandis Kalmukov. — Ni atendas, atendas.

— Ili venas, tuj estos ĉi tie...

Apraksin leviĝis sur la ŝipon la unua, post li du svedaj oficiroj kondukis Ehrenschiöld-on, post la kaptita subadmiralo iris Silvestro Petroviĉ Ievlev. Poste, lacaj, silente leviĝis Weide, Golicin, Volkov, Buturlin, kaptitaj svedoj: veselkapitano, rigardanta kiel bovo al ruĝa tuko, kun la brako sur skarpo, ankoraŭ oficiro sen kaftano, du leŭtenantoj — junaj, blondaj, timigitaj...

Sur la pobferdeko Apraksin ordonis al Kalmukov:

— Jen kio, kapitan-komodoro, sendu signalojn al la ŝipa floto — ankrojn levi, sekvi min. Kaj al la svedaj militŝipoj, super kiuj nun estras Sivers, same ordonu — sekvi nin kolumne.

— Jes!

Kaj per alia voĉo, tute maljunula, kun laca raŭko, Apraksin demandis:

— Nu? Ĉu vi militis? Viva vi estas, kapitan-komodoro?

Poste, pririgardante la stelan ĉielon, li aldonis:

— Sed ne baldaŭ ankoraŭ hejmen, ne, ne baldaŭ.

— Ĉu nun al Svedio? — demandis Luko Aleksandroviĉ.

— Ĉu tuj rekte al Svedio? Ne, fraĉjo, vi tro hastas, kiel mi vidas. Ne, ne tiel estos. Nia galera floto estas konsumita, ankoraŭ ripari necesas, kalfatri, kanonojn ŝanĝi. Ne, pri la sveda reĝlando ni ankoraŭ atendos. Ni simple vagos, homojn vidos, nin mem montros. Ni krozados, kiu devas, kapitan-komodoro, tiu rigardu — eliris la rusoj per floto post sia glora viktorio. Iuj gratos la nukojn, pensos, cerbumos. Nu kaj se ni iun saboton faros, do estu tiel...

Li suspiris, sidis iom sur la pobferdeko en sia larĝa malnova fotelo, poste foriris dormi.

Ĉe mateniĝo la ŝipa floto levis ankrojn kaj direktis sin en longan navigadon. Skoltoj kaj veturigitaj sur «Sanktan Antonion» kaptitoj ekzakte konfirmis, ke la granda floto de admiralo Wattrang foriris al la Alanda maro por defendo de la bordoj de la reĝlando kontraŭ elŝipigo de rusaj trupoj. Kaptita apud Abo kapera ŝipo estis veturiganta poŝton; el la leteroj Silvestro Petroviĉ komprenis, ke en Svedio estis deklarita ĝenerala mobilizo, ke sur kajoj de multaj svedaj urboj oni metas baraĵojn kaj ke la venko ĉe Hanguto estas la kaŭzo de ĉiuj ĉi agoj.

La okan de aŭgusto la galeroj kaj velgaleroj de la rusa floto okupis la Alandajn insulojn. Pri tiu evento Petro sciigis Apraksin-on per mallonga letereto, sendita kun kuriero sur ŝerboato «Flundra», kaptita ĉe Hanguto.

Ŝipoj de la Rusia floto eliris en la Baltan maron. La Andreaj flagoj flirtis sub aŭtuna mara vento, la rusaj ŝipoj insiste kaj persiste serĉis renkonton kun la kontraŭulo, serĉis batalon, serĉis okazon fini la svedan maran potencon. Sed la svedoj post Hanguto iĝis pli singardaj, nun ili foriris, kaŝiĝis, maskis sin.

Nur de la bordoj sekrete per lornoj agentoj de la reĝlando kaj maraj oficiroj pririgardadis la rusan ŝipan floton, balancadis la kapojn, sulkigadis la vizaĝojn, kolere suspiradis: «aĥ, perdita tempo, perdita, nun ne eblas sufoki, nun estas malfrue, eliris Moskvio sur marojn!» Kaj penadis diveni, kie estas «Elefanto», kaptita de la rusoj, kie estas «Mortan», «Simpan». Sed estis malfacile inter multegaj ŝipoj laŭ konturoj rekoni siajn ŝipojn...

La rusoj retenadis kaperŝipojn — unu post alia, kaptadis negocistojn, kiuj estis veturigantaj en Svedion kanonojn, fusilojn, pulvon, aliajn militajn provizaĵojn. Silvestro Petroviĉ faradis por ĉi rompantoj de konvencioj severajn riproĉojn, la armilaro estis konfiskata. La negocistoj konfuziĝadis, insultadis la svedojn, ke tiuj ne donas bonajn eskortojn, proponadis al la moskvianoj komercon. Silvestro Petroviĉ respondadis seke:

— Por kio, sinjoroj negocistoj, vane svingi la langojn. Al ni kun varoj ni vin ĉiam bonvenigas, tion vi ĉiuj scias. Sed ĉar iris nun vi ne al ni, sed al nia kontraŭulo, vi mem solvu viajn malprofitojn. Eble, vi iĝos pli saĝaj...

En la mezo de aŭgusto la galera kaj la ŝipa flotoj kuniĝis proksime de Helsingforso[162]. Petro leviĝis laŭ la parada ŝtuparo de «Sankta Antonio» — gaja, maldikiĝinta, malpeza, tuta bronza pro sunbruno, tuj fermiĝis kun Jaguĵinskij kaj Apraksin — elpensi ordon de ceremonio de reveno kun venko en sian Paradizon — Sankt-Piterburgon. Ievlev samloke raportis al li pri kanonoj, pulvo, muskedoj, prenitaj dum la krozado, Petro ludis per la brovo, ŝmacis per ĉibuko, kapjesis:

— Do, bone, amiko kara. Tiel ni ankaŭ poste faros... Kaj nun eksidu kun ni, necesas ceremoniaron elpensi — kiel ni

162 Nun Helsinko *(trad.)*

revenos. Unuafoje, mi pensas, sur la maro ni tian viktorion atingis...

Ili elpensadis la ceremoniaron longe kaj gaje. Luko Aleksandroviĉ, fumante pipon, el sia kajuto tra maldika septo aŭdis laŭtan ridegon de la caro, ridon de Jaguĵinskij, grumbladon de Teodoro Matejeviĉ:

— Ho, tiaj solenaĵoj por ni estos ne pli facilaj, ol la ĝenerala batalo. Je Dio, Petro Aleksejeviĉ, kiom da tempo ni estas en la maro, necesas ja kviete hejme vivi iom. Sed jen vi por kvin tagoj dispoziciis la ceremonion. Festeno, kaj fajraĵo, kaj kunsido de la Senato, kaj ankoraŭ bruoj, kaj de dekoracioj surmetado...

Frue matene de la kvara de septembro Silvestro Petroviĉ, turmentiĝinte pro sufokeco en la kajuto, eliris por spiri sole per freŝa mara aero. Sed ĉi tie, kun taso da kafo, en surmetita sur la ŝultrojn mantelo, staris morna subadmiralo Ehrenschiöld. Ievlev deziris tuj foriri al la pobkastelo, Ehrenschiöld per sia ĝentila, egalmezura kaj malvarma voĉo petis oferi al li kelkajn minutojn de matena libertempo. Silvestro Petroviĉ malvarme riverencis.

— Ĉu ĉi fortreso nomiĝas Kronŝloto? — demandis Ehrenschiöld.

— Nomiĝas Kronŝloto, — konfirmis Ievlev. — Ĝuste ĉi tie via admiralo Anckarstierna havis kelkajn gravajn malvenkojn.

Ehrenschiöld faris malpaciencan geston per la mano — iomete da kafo elverŝiĝis el la taso.

— Poste estos Sankt-Piterburgo?

— Jes, estos Piterburgo.

Ili silentis.

Vento egale fajfetadis en ŝnuroj, la floto iris rapide, post la ŝipoj restadis blankaj, ŝaŭmaj surfoj.

— Ĉio ĉi similas al sonĝo! — subite tra la dentoj, kun kolero prononcis Ehrenschiöld. — Jes, jes, al tre malagrabla, malbona sonĝo. Mi memoras, memoras mem, ke ĉi tie estis nenia fortreso. Ĉi tie estis plata tero kaj lignodomoj, kelkaj ĥatoj, aŭ kiel tio nomiĝas ĉe vi? Sed nun ĉi tie estas Kronŝloto, kaj poste urbo Sankt-Piterburgo...

— Ĉi tie estas Rusio! — konfirmis Ievlev.

— Kaj ĉu en Svedio por vi same estos Rusio? — demandis kun kurba subrido Ehrenschiöld. — En Stokholmo, ekzemple?

Silvestro Petroviĉ strabis al Ehrenschiöld, al la taso da kafo, kiu tremis en liaj fingroj, poste komencis silente rigardi al la griza, obtuze bruanta maro...

— Ĉu vi ne respondas al mi?

— Mi ne havas, kion respondi. Stokholmo estas la ĉefurbo de la sveda reĝlando.

— Tamen mi mem de via monarĥo aŭdis, ke vi supozas fari tie grandan elŝipigon, kaj mi ankaŭ scias, ke en Svedio oni timas tion kaj preparas indan rebaton. Por kio vi bezonas ĉi elŝipigon?

— Por truddevigi pacon al via reĝo.

— Kaj poste?

— Kaj tio estas ĉio, *herre* subadmiralo.

— Sed rusaj flagoj super la ĉefurbo de la sveda reĝlando...

— Vi konfuzas, *herre* subadmiralo, — kun malbona rideto prononcis Ievlev. — Ĝuste en Svedio oni dum multaj jaroj paroladis kaj, eble, ankaŭ nun parolas pri svedaj flagoj super la grizharaj muroj de Kremlo. Tio estis via reĝo, kiu bonvolis nomumi gubernatoro de Moskvio iun Axel Sparre. Sed ni deziras alion, tute alion...

— Kion?

— Ni deziras pacon kaj trankvilan vivo. Nur pacon.

Ehrenschiöld silentis, malserene rigardante antaŭen. Kaj Silvestro Petroviĉ subite eksentis, ke paroli, probable, tute ne indis, ke Ehrenschiöld apartenas al tiuj homoj, kiuj ne deziras kaj ne scipovas kaj vidi, kaj aŭskulti, kaj kompreni, al tiuj homoj, pro kies kulpo ankoraŭ ne baldaŭ finiĝos sur ĉi peka tero tondrado de kanonoj, fajfado de mitrajlo, krakado de fusiloj, ĝemado de vunditoj.

— Ĉu vi deziras pacon? — subite demandis la svedo. — Sed ĉu ĝi ekzistas? Ĉu vi deziras justecon? Mi aŭdis ĉi tie, sur via ŝipo pri tio, ke ĉi akvoj kaj teroj, al kiuj ni iras kun via eskadro, delonge apartenas al viaj prauloj! Sed ĉu tio koncernas nin? La sveda prudento kaj la sveda forto, la sveda kuraĝo kaj pafado de la svedaj kanonoj — jen kio estas la plej granda kaj sola justeco, *herre* subadmiralo, ĉu vi ne konsentas kun mi?

Silvestro Petroviĉ kvazaŭ denove fiksrigardis la sunbrunan vizaĝon de Ehrenschiöld, liajn helajn brovojn, poste diris malgaje:

— Ne, mi ne konsentas kun vi, *herre* subadmiralo. Kaj pli — mi kompatas la svedan reĝlandon.

Ehrenschiöld fintrinkis sian malvarmiĝintan kafon, surmetis

la tason, pli dense envolvis sin en la mantelon:

— Ĉu kompatas?

— Jes. Ĝi povus resti granda regno.

Kaj, mallonge riverencinte, Silvestro Petroviĉ ekiris al la pobkastelo — spiri kaj pensi en soleco.

En krepusko la ŝipoj akceptis pilotojn. Vento fortiĝis, salaj ondoj kun bruo dispeciĝadis al la flanko de «Sankta Antonio». Ivano Ivanoviĉ ĉe la ŝnureskalo renkontis la patron, brakumiĝis kun li, flustre rapide demandis, kiel fartas panjo, ĉu estas sana Irena Silvestrovna...

— Sanaj, sanaj, kio al ili povas fariĝi! — per karesa baso respondis la piloto. — Ĉe ni ĉio estas en ordo. Ĉe vi, mi pensas, pli brue estis, ol sur la Bazila insulo...

Sur la pobferdeko apud la stirrado staris Apraksin kaj Ievlev — atendis eliron de la caro, kiu devis transiri al kaptita sveda velgalero, por sur ĝi solene eniri Nevon. Sur «Elefanto» devis iri subadmiralo Ehrenschiöld. Ivano Sabateiĉ riverencis al ambaŭ admiraloj, transdonis al Silvestro Petroviĉ riverencon de ties edzino kaj filinoj, surmetis la fortajn polmojn sur la mantenilojn de la grandega rado. La caro finfine aperis, rapide, kun la ŝultro antaŭen trapaŝis al la ŝtuparo. Post li oni trenis du liajn vojaĝajn kofretojn, post la kofretoj morne trairis admiralo Ehrenschiöld en akompano de sia sekvantaro.

— Ĉu svedo? — demandis Rjabov la filon.

— Li! — respondis Ivano Ivanoviĉ. — La ĉefa ĉe ili.

— Tro fiere li iras! — eldiris Rjabov. — Vi lin kaptis, sed orgojlon al li ne malgrandigis. Ĉiam vi, probable, regalas

sinjoron svedon, ĉiam kun riverenco kaj kun danko. Kaj li la nazon tenas supren...

Apraksin estis silente ridetanta, ridetis ankaŭ Silvestro Petroviĉ. Aliris Kalmukov, parolis kun Rjabov pri ŝipa irado, pri veloj, pri ankra ŝiphalto ĉe Nevo. Ekfajfis fajfiloj, ekbatis alarmaj tamburoj, matrosoj ekgrimpis laŭ stajoj hisi velojn. La floto ekiris, kliniĝante sub vento, salaj, malvarmaj ŝprucoj leviĝadis ĝis la pobferdeko mem, Ivano Sabateiĉ nur snufadis. Ĉiam pli proksimaj iĝadis nun varmaj, flavaj, flagrantaj fajretoj de la juna urbo, etendiĝinta sur marĉaj bordoj de la larĝa rivero. Tie — kaj en malaltaj kabanoj sub ŝindaj kaj pajlaj tegmentoj, kaj en novmanieraj domoj, konstruitaj laŭ ordono de policestro Devier[163] kun tri kaj ses fenestroj, kun unu aŭ du fornaj tuboj, kaj en palacoj de caraj favoratoj kun ŝtofaj tapetoj, kun unikaj kunmetitaj plankoj — ĉie atendis maristojn patrinoj, edzinoj, infanoj, fianĉinoj, amikoj, ĉie vaporis pirogoj — de sekalaj kun eperlanoj ĝis plej neordinaraj, grandegaj — kun nanoj, kaŝiĝintaj interne, kun fajraĵoj, kiuj devis ekbruli kaj disŝutiĝi per fajro, kiam oni eksidos en la palaco al festena tablo...

Neniu dormis en ĉi tiu nokto en la urbo Sankt-Piterburgo — nek en la Bazila, nek en la Admiraleja parto, nek en la Armila, nek en la Kantora, nek en la Monera stratoj, kie loĝis metiistoj, nek apud Karpovka, kie entute estis finiĝanta la urbo kaj staris barilo kontraŭ lupoj, kiuj de tempo al tempo penetradis la ĉefurbon kaj buĉadis brutojn, kaŭzante nemalgrandajn malprofitojn por urbanoj. Ne estis nun familio, kie oni ne

163 Devier, aŭ António Manuel de Vieira (1674/1682–1745) — la unua policestro de Sankt-Peterburgo, deveninta el portugalaj baptitaj judoj; fakte kreinto de regula polico en Rusio kiel memstara ŝtatorgano.

atendus proksiman homon, kiu tiutempe aŭ de ŝipo, aŭ de galero, aŭ de fregato aŭ brigo avide fiksrigardis kurantajn renkonten lumojn de Peterburgaj antaŭurboj.

— Nu, kio do estas hejme? — demandis Apraksin la piloton.

— Ni vivas iel-tiel, sinjoro general-admiralo! — respondis Rjabov. — Vidu, urbeto nia lumas. Atendas navigantojn. Kun honoro oni renkontas, pafado multekanona estas deklarita, aliaj diversaj kuriozaĵoj...

— Kio, kio? — demandis Ievlev.

— Ja tiel diras homoj — kuriozaĵoj, nu kaj mi tiel diras...

Rjabov movis la stirradon, atente fiksrigardis la noktan obskuron, diris al Ievlev:

— Rigardu al la Bazila, Silvestro Petroviĉ. Tie iuj konataj de vi personoj lanternon svingas. Ĉu vi vidas? Jen — supren kaj malsupren. Ĉu ne vidas?

— Mi vidas! — per obtuza voĉo respondis Kalmukov. — Ne eblas ne vidi!

— Svingas, Ivano Sabateiĉ, sed ne al mi! — subridis Ievlev. — Al via markadeto...

— Kaj al vi, certe! Ankaŭ al vi...

— Nur eble — ankaŭ. Nia tempo estas for, Ivano Sabateiĉ, post paso de la juneco...

Ĉe la dekstra flanko, devancante la ŝipojn, kun tambura batado, kun ululado de timbaloj kaj basa kantado de trumpetoj, ekiris la kapaj galeroj de Petro. Peĉaj, fulgantaj sub vento torĉoj prilumis kaptitajn svedajn oficirojn, la malhelan pezan

vizaĝon de Ehrenschiöld, la flagon de lia eskadro, klakantan en la Neva humida vasto. Sur la bordoj — kaj proksime, sur la Isaaka sonorilejo, kaj malproksime, en preĝejo de Sankta Nikolao sur Malsekaĵo, kaj en aliaj malgrandaj preĝejoj — gaje eksonoris sonoriloj, de fuortoj de la Petropaŭla fortreso akorde batis ĉiuj kanonoj — kaj pezaj kaj malpezaj. Super la svedaj kaptitaj ŝipoj eksplodis komplikaj raketoj, en la nigra humida ĉielo longe brulis skribaĵo: «kaptante kaptita». Sur Nevo, sur ties krutaj ondoj ekkuris al la ŝipoj, ĵetantaj ankrojn, gigoj, boatoj, ŝerboatoj, malgrandaj velŝipoj. De ĉie oni kriadis, svingadis trikornajn ĉapelojn, ĉapojn, peĉajn torĉojn.

Teodoro Matejeviĉ Apraksin leviĝis de sia malnova fotelo, suspiris, nelaŭte diris al Rjabov:

— Kaj ĉu ne veturigos vi min, amiko kara, Ivano Sabateiĉ, nerimarkeble en tiu bruo, sur via boateto al mia hejmo. Laciĝis mi nun dum la militiro, kaj la ostoj en mara humideco ial komencis dolori. Mi venos, oni hejtos por mi banejon, mi kuŝos, eble, Petro Aleksejeviĉ pri mi ne rememoros...

— Kial ne? Mi veturigos! — promesis Rjabov. — Vi nur, Teodoro Matejeviĉ, iun mantelon pli malriĉan kaj pli truan surĵetu super la uniformo. Ja tro multas sur vi oro, kaj dekoracioj, kaj diversa brilaĵo. Oni rekonos — kaj vi ne sukcesos vin ŝvitbani...

— Ĝi estas vero...

Pli malriĉa mantelo troviĝis kaj duope — la unua piloto kun la general-admiralo — ili malleviĝis en la boateton. Rjabov veturigis Apraksin-on al lia palaco, poste direktis sin reen trans Nevon al la Bazila insulo. Kanonoj plu tondris — kaj apud la Admiraleja kolegio, kaj apud la Senato, kaj de la Triunua

placo, kaj de la fuortoj de la fortreso. Fajraĵoj unu post alia, kaj iam eĉ po kelkaj kune krevadis en la nigra, senstela, kovrita de nuboj ĉielo, el tie ŝutiĝadis ora kaj arĝenta pluvo, faladis figuroj de virinoj, militaj armaĵoj el diverskolora flamo, aliaj nekompreneblaj kurbaĵoj, nomataj alegorioj.

Ĵetante rigardojn al tuta tiu pompo, Ivano Sabateiĉ transportis sin sur la Bazilan, alligis la boateton ĉe la Ievlev-a albordiĝejo, dolĉe tiris sin kaj ekiris laŭ ŝtupoj supren, kiam subite apud malnova betulo rimarkis senmove starantan Silvestron Petroviĉ-on.

— Kial vi al la tablo ne iras, sinjoro subadmiralo? — demandis la piloto. — Oni vin jam longe atendas, mi pensas. Kiam brui, se ne hodiaŭ. Estas pro kio! Kaj kiom da pirogoj estis bakite ĉe ni, kaj da viando kuirite...

Silvestro Petroviĉ plu silentis.

— Jen, silentas, pensas! — eldiris Rjabov. — Pri kio vi enpensiĝis do, sinjoro subadmiralo?

— Ja pri ni mi pensas. Jen rememoriĝis iu malproksima tago en la Novdvina citadelo, kiel konversaciis vi kaj mi, serĉante, per kio savi la unuajn ŝipojn de la Rusia floto. Probable, ankaŭ vi tiun tempon ne forgesis...

Rjabov silentis iom, poste prononcis senhaste, kun subrido:

— Ne, mi ne forgesis. Kaj ke ni hodiaŭ rememoras, do tio, probable, estas konvena. Multe ni tiam suferis — kampuloj, maraj laborantoj. Ne estas bone forgesi...

— Tio, eble, eĉ ne forgesiĝos! — kun morna trankvilo prononcis Ievlev.

Epilogo

> Rusio eniris en Eŭropon, kiel surakvigita ŝipo, ĉe frapado de hakilo kaj ĉe tondrado de kanonoj.
>
> *Puŝkin*

Pasis ankoraŭ kelkaj jaroj.

En malvarma printempa nokto Rjabov-on vekis nekonata soldato — kuriero el la Admiraleja kolegio — kun ordono sen prokrasto hasti al la loko.

Taisja, kolerante, ke eĉ nokte oni ne lasas la piloton kvieta, kolektis por li pakon, kiel ĉiam, forakompanante la edzon en la maron, staris iom ĉe la barilpordeto kaj revenis hejmen. Ivano Sabateiĉ, oscedetante post dormo, paŝadis post la soldato, demandante, kio tia okazis, ke li subite eknecesis tiom frue. La kuriero ne respondadis.

— Ĉu vi silentas? — interesiĝis la piloto. — Nu-nu, silentu, silentu, via posteno estas tia. Scias vi multe, sed babili ne estas permesite.

En malalta halo de la kolegio super amaso de maraj mapoj sidis en malbutonitaj kaftanoj general-admiralo Apraksin, admiraloj Crøys kaj Silvestro Petroviĉ Ievlev. La pordo al la najbara ĉambro estis malfermita, el tie aŭdiĝis voĉoj de caro Petro kaj de fama ŝipkonstruisto Teodozo Skljajev. Petro Aleksejeviĉ koleris, Skljajev estis praviganta sin pri io.

— Kial vi tiel longe iris? — demandis Apraksin moke. — Ĉu subite iĝis maljuna?

— Sed ja ankaŭ ne juna, sinjoro general-admiralo! — respondis Rjabov. — Foriris, forkuris nia juneco. Klabo el maljuna arbaro...

Apraksin ordonis al li eksidi kaj atendi Petron Aleksejeviĉ-on. La piloto eksidis nek proksime, nek malproksime — laŭ la rango. La general-admiralo ekparolis, turnante sin al Ievlev, evidente daŭrigante komencitan antaŭe konversacion:

— Ĉio ĉi estas vero, tiel ili ankaŭ antaŭe faradis, tiel ankaŭ poste faros, ĉar nia bono por ili estas kiel ponarda piko. Ne vane Bazilo Lukiĉ Dolgorukov siatempe al la Siro skribis, ke anglaj ambasadoroj en Kopenhago movadis la ĉielon kaj la teron, por deteni la danojn de milita unio kun ni kontraŭ la svedoj. Kaj iom poste Dolgorukov la Siron sciigis, ke kvazaŭ iu nobela persono estas sendita de la angloj en Svedion kun sekreta promeso, ke ĉion perditan de la svedoj sen peno kaj sen malprofito la angloj laŭ la ĝenerala paco al ili redonos kaj ke tie oni ne dubu post nia Poltava viktorio...

Ievlev interrompis kolere: promesi ili scipovas, sed ĉion por ke la milito ne finiĝu. Se ne estus la angloj kun iliaj promesoj al la svedoj, probable post Poltavo la svedoj tuj kvietiĝus.

— Ne povas ili toleri tion, ke Rusio sur sian maron eliris, — daŭrigis Apraksin. — La forpasinta sveda Karolo, kion ne faris mem, ne sukcesis, tion al la angla Georgo testamentis. Jes, Georgo estas pli lerta, ol la forpasinto, pli ruza. Do li ordonis al admiralo Norris vagi sur siaj ŝipoj, fari aĉaĵojn al ni, por ke ni, ektiminte, foriru el la Balta maro... Kiel oni diras, Norris kidnapon intencis?

— Por tielaj trukoj ĉe ili multaj majstroj troveblas, — respondis Ievlev. — Admiralo siro Bing laŭ ordono de reĝo

Georgo sendis du fregatojn — unu al Dancigo, alian al Kenigsbergo, — por kapti la svedan unuan ministron, kiu al la Alandaj insuloj iri intencis por paca intertraktado kun ni. Sed la sveda Görtz — mem ŝtelisto ne malpli ol la anglaj ŝtelistoj — ekiris el Revalo. Kaj tiuj restis kun longa nazo. Kaj siro John Norris kvazaŭ intencis niajn plenrajtajn ministrojn kapti, sed sukceson ne trovis, malfruis kun sia floto. Piratas sinjoroj anglaj maristoj...

Rjabov silentis, aŭskultis, movante la atentajn okulojn de Apraksin al Ievlev.

Apraksin, mallarĝigante la okulojn al fajreto de kandelo, diris penseme:

— Ja ni sukcesos, eliros en la nuna somero sur la Baltan maron per tuta nia granda floto. Tiam gratos sin Norris. Se ni eliris sur la maron — necesas navigi, tiel ankaŭ la Siro rezonas...

En la najbara ĉambro laŭte ekridis Petro, tra la halo trairis Teodozo Skljajev kun volvaĵo de desegnaĵoj, riverencis al la admiraloj, fermis post si la pordon. La admiraloj ekstaris. Petro per larĝaj paŝoj aliris al la kameno, per pinĉilo elprenis braĝon, komencis bruligi la pipon. Snufante dolĉan fumon, li demandis:

— Pri kio vi konversacias?

— Jen Silvestro Petroviĉ rakontis pri iuj ruzaĵoj, — respondis Apraksin. — Norris friponaĵojn en la Balta maro faras, piratas...

La caro, hirtigante la griziĝantajn lipharojn, kun pipo en la mano trapasis la halon, diris severe:

— Ni sur la Baltan maron eliris kaj sur ĝi firme staras. Kaj

nek niaj infanoj, nek nepoj, nek pranepoj ĉi landon cedos, por ke la verŝita sango de niaj batalistoj ne riproĉu. Kaj nin ĉi piratoj ne timigu, ni ne estas timemaj. La svedon ni humiligis, li iĝis kvieta, sed kia estis — rememoru! Super la tuta Eŭropo staris. Kaj al la angla Georgo, same kiel al aliaj ceteraj potenculoj, pli ofte necesas rememorigi la malĝojan sorton de Karolo Dekdua.

Li proksime aliris al Rjabov, demandis per alia, gaja voĉo:

— Ĉu vi tute adaptiĝis en Piterburgo, piloto? Forgesis la gloran urbon Arĥangelskon?

— Li domon konstruis! — diris anstataŭ Rjabov vicadmiralo Ievlev. — Kaj ne lignan, sed kiel laŭ la reglamento estis ordonite — el briko, sub tegolo, en la fronto tri fenestroj. Legomĝardenon aranĝis, bovinon aĉetis, lakton manĝas...

— Ĉu la bovino, mi esperas, ne estas rabia[164]? — subridante, demandis la caro.

— Por nepoj, Petro Aleksejeviĉ, sen bovino neniel eblas. Kaj ke ne rabia, do tiuj tempoj, Siro, forpasis. Iam pro festo okazas, sed diboĉi kiel antaŭe — ne, estas malfacile!

— Jen, kia maljuna oldulo! — ridante per la okuloj, diris Petro. — Tamen post la viktorio ĉe Hanguto havis ni honoron vidi vin en gaja humoro. Forte vi bruis, sinjoro unua piloto...

— La filo tiam, Siro...

— Filo, filo! Dank' al Dio, ni komprenas, ni mem vian filon en afero vidis, tamen ne modestu, povas vi ankoraŭ montri vin, kia vi estas Arĥangelska rudristo.

---

164 Aludo al drinkado («lakto de rabia bovino» — alkoholo) *(trad.)*

— En tiuj tempoj — la Hangutaj — mi pli juna estis...

— Pli juna? Sed ni tiel pensas, ke ankaŭ nun vi, piloto, ne estas maljuna, sed nur iom al la bordo algluiĝis. En maron necesas iri por pli longe, salan, karan por la koro venton spiri...

La rudristo staris senmove, liaj verdaj okuloj el sub la grizaj brovoj akre rigardis al la caro.

— Antaŭ nelonge en Moskvo faris ni naturan ekzamenon por niaj navigistoj, kiujn instruas flota leŭtenanto Rjabov Ivano filo de Ivano, — diris Petro. — Filo via, sinjoro unua piloto, estas homo ne nur flarinta pulvon kaj vidinta kanonan pafadon, sed ankoraŭ en sciencoj diligenta, kaj aliajn instruas esti bonaj navigistoj. Navigacion platan, navigacion Merkatoran, sferan li ne nur mem perfekte ekposedis, sed ankaŭ aliajn instruas — pli bone ne eblas deziri. Ĉi leŭtenanto kun siaj disĉiploj multe nin ĝojigis, kaj faris ni decidon: navigistojn niajn eksterlanden por mara praktiko ne sendi. Ni havas propran floton, havas ankaŭ ŝipestrojn por ŝipoj. En ŝipkonstruejoj en urbo Arĥangelsko, same kiel en aliaj lokoj, ni konstruas ŝipojn. Ekde nun ni ilin el tie al la Balta maro transportos ĉiujare helpe de junaj navigistoj. Utilo nemalgranda por junuloj-maristoj. Kaj al vi, piloto, ni ordonas navigi kun la navigistoj kiel mentoro, instrui ilin pri mara praktiko, pri tio instrui, kion ankaŭ ni en la antaŭaj jaroj transprenis de vi.

Rjabov silentis. Sur lia kruda pro vento vizaĝo, kovrita de maldika reto da faltoj, aperis ruĝaj makuloj.

— Nun iros tri kvindek-du-kanonaj ŝipoj, — daŭrigis Petro, — «Gabrielo», «Arĥanĝelo Miĥaelo» kaj «Rafaelo». Kiel komodoron super la eskadro sendas ni sinjoron vicadmiralon Ievlev-on Silvestron Petroviĉ-on. Sur la vojo faros la eskadro

viziton en la havenon Kopenhagon, por ke oni vidu tie ordon de nia floto kaj amikan nian rilaton al ĉi ŝtato...

Ĵetinte kelkajn brulŝtipojn en la kamenon, Petro alŝovelis braĝojn kaj staris iom, rigardante, kiel flamo vigle kaj gaje ekkuris sur la rezina brulligno. Poste li kapjesis al Rjabov:

— Tiele, piloto! Iru, prepariĝu por longa vojaĝo. Kiam vi revenos — mi vin demandos, kiel navigistoj iĝis veraj maristoj.

Rjabov eliris, kunpreninte la pakon de Taisja, kvazaŭ tuj intencis iri en la maron.

Petro eksidis en fotelon, etendis la longajn krurojn al la kameno, subridis:

— Ĉu vi vidis, kiel li ekkuris? Kvazaŭ vere tridek jarojn for. Kaj revenos li tute kiel junulo. Ja maro la animon ĝojigas.

Kaj li demandis:

— Kiujn kiel ŝipestroj sur la ŝipojn, Silvestro?

Ievlev rapide interrigardis kun Apraksin, tiu respondis:

— Mi pensas, Siro, ne iru kiel ŝipestroj angloj. Nun, dankon al Dio, ni ĝisvivis, havas ni ankaŭ proprajn maristojn — verajn, naturajn rusianojn.

Petro grumblis ne returniĝante:

— Skribu liston por rusoj.

— Skribita! — kun preteco respondis Apraksin. — Ĉiuj tri estas kapitan-leŭtenantoj. Sur la flagŝipo iros Jegoro Pustovojtov.

— Via petolulo Pustovojtov estas tro flamiĝema, ĉu ne?

— Li kvietiĝos! — milde diris Apraksin. — Ankoraŭ juna li

estas, pro tio flamiĝema.

Kaj li aliris al Petro kun plumo kaj la listo. Admiralo Crøys, dume silentinta, rimarkis, tusetante:

— Tamen iuj fremdlandaj ŝipestroj havas sperton...

— Kaj admiraloj, kiel vi! — subite kriis Petro. — Ĉu vi forgesis, kiel «Viborgon» vi surgrundigis? Ĵus el la ekzilo revenis, kaj jam bojas! Ĉu mi Rees-on vian trolaŭditan, kiu la kontraŭulon lasis eskapi, reen al la floto revenigu? Sidu kaj silentu, alie mi vin por ĉiam el la servo elbatos!

Li kolere subskribis la paperojn, redonis al Apraksin, demandis — kio ankoraŭ necesas. Tiu diris rezolute:

— Koncerne ĉi unuan piloton, Siro. Rigardu ĉirkaŭe, kiom multaj homoj altajn rangojn atingis: Silvestro Petroviĉ estas vicadmiralo de la Rusia floto, mi estas general-admiralo, vi same estas vicadmiralo, Pamburg kaj Varlan estas subadmiraloj...

— Nu! Kion vi celas?

— Sed Rjabov kiel estis sur Dvino unua piloto, tiel ankaŭ sur Nevo plu iras kiel unua piloto...

Petro ekstaris, frapis Apraksin-on per la fleksita fingro al la frunto, diris bonanime:

— Vidu, kia malfeliĉo: maljuna vi estas, Teodoro Matejeviĉ, grizhara, tute kalva, sed saĝon eĉ ĝis nun ne akiris. En Rusujo ankoraŭ kiom granda multo estos de similaj al ni vicadmiraloj, general-admiraloj, subadmiraloj kaj aliaj ceteraj altranguloj. Sed la unua piloto, dum Rusujo vivas, por ĉiam en ĝia historio estos. Por tio li estas la unua! Ĉu vi komprenis,

ŝtipkapulo?

— Kiel ne kompreni! — ne sen konfuziĝo respondis Apraksin.

— Kaj se komprenis, do ni veturu! Ne estas frue!

Jam venis tago, kiam ili kvarope eliris el la domo de la kolegio. Gvardianoj prezentis la armilojn, al la perono alveturis kariolo de Petro kaj kaleŝo de Apraksin.

— Eksidu kun mi! — ordonis Petro al Ievlev kaj palpebrume almontris Crøys-on. — Vidu, paŭtas...

Apraksin deveturis. Petro prenis la kondukilojn, svingis la knuton, la kariolo, kliniĝante sur kavoj, tondrante per feritaj radoj, rapide ekkuris laŭlonge de Nevo al la palaco. La bordo estis malkrute malleviĝanta al la akvo, Peterburgaj loĝantoj jam elpelis paŝtiĝi bovinojn. Per du antaŭaj kruroj samtempe estis saltanta ĉe la akvo mem ĉevalino kun ligitaj kruroj, ties ĉevalido estis trinkanta el la rivero. Dekstre super legomĝardenoj, super velkaj ĝardenetoj, super malaltaj domoj estis flugantaj kornikoj, laŭte, kartave grakadis. Trans Nevo, sur la Bazila, vento estis glate turnanta nigrajn muelilajn alojn, tie sur mueliloj oni segis tabulojn por la Admiralejo.

— Se vi estos kun vizito en la dana reĝlando, en urbo Kopenhago, — diris Petro al Ievlev, — kun honoro akceptu sur la ŝipon libron de nia forpasinta Ĥilkov; ĉi viro finis vivon sian en sveda kaptiteco kaj senĉese laboradis ĝis la morto mem. Vi akceptos ankaŭ la restaĵojn de Andreo Jakovleviĉ, ni sepultos lin kun honoro ĉi tie en la tombejo de Aleksandro la Neva...

Li demandis, turniĝinte al Ievlev per la vizaĝo:

— Kiom da tempo vi hejme ne estis? Ĉu monaton, du?

— Pli multe, Siro. Kiam komenciĝis elŝipiĝo en Svedio de nia armeo, ekde tiam ne estis. Baldaŭ estos jaro...

— Nu, iru, iru hejmen, — distrite prononcis Petro. — Jam, eble, vi iĝos avo baldaŭ?

— Mi jam delonge estas avo! — kun rideto respondis Ievlev. — Du nepojn mi vidis, kaj la trian — nepinon — ankoraŭ ne sukcesis vidi, en navigado estis.

— Jen kio! — tute ne aŭskultante Ievlev-on, interrompis Petro. — Vi kiam en Arĥangelskon venos — mem rigardu, ĉu ili pretas la bonan amikon, la anglan latronon, akcepti. Kaj por gubernatoro Lodiĵenskij mi jam hodiaŭ ukazon preparos. Kun ĉi ukazo vi rajdos. Kaj skuu la gubernatoron, klarigu al li, kiel fari necesas...

Li haltigis sian kariolon ĉe nova duetaĝa palaco en la Somera ĝardeno apud Fontanko, ĵetis la kondukilojn al elkurinta servosoldato kaj, preninte Ievlev-on ĉe la kubuto, eniris kun li en la vestiblon, plu rezonante pri Arĥangelsko. En la manĝoĉambro Petro kriis:

— Brasiksupon varman, Velten, tuj!

Manĝante la varmegan brasiksupon, brulvundante sin, li kolere diktis al Ievlev memornoton al la gubernatoro en Arĥangelsko:

«...ke kontraŭ anglaj militaj ŝipoj havu singardon, kaj la komercajn kortojn per palisaroj kaj bastionoj fortikigu kaj kanonojn metu, kaj komercajn ŝipojn metu en sekuran lokon...»

Subskribinte la paperon, Petro mem ekiris en la kabineton, alportis el tie ledan sakon, malfermis ĝin, montris al Silvestro Petroviĉ kopion de sekreta ordono de admiralo Norris por la

eskadro. Per malmola ungo estis substrekitaj vortoj: «...en ajna tempo, kiam vi atingos iujn rusajn ŝipojn, vi devas uzi ĉiujn rimedojn, por kapti, dronigi, bruligi aŭ en ia alia maniero detrui ilin». Ĉi tie estis ankaŭ alia kopio — de letero de siro Stanhope al sama Norris. Silvestro Petroviĉ ree legis substrekitajn liniojn: «Ne restas deziri ion pli bonan, ol nur ke iliaj ŝipoj kaj galeroj trafu sur vian vojon, kaj ne estas duboj, ke vi en ĝusta maniero traktos ilin...»

Ievlev finlegis. Petro, kuntirante la brovojn, kaŝis la paperojn en la sakon, ekparolis, paŝante en la ĉambro, profunde ŝovinte la manojn en la poŝojn de la kaftano:

— Dudek unu batalŝipojn kaj dek fregatojn li havas, nun ĉiuj ili estas en Svedio. Ili venigis sesdek komercajn ŝipojn kun varoj, por kio? Por ke kaj ni kaj la svedoj sensangiĝu, tiam la anglaj siroj kaj pajroj ĝojos kaj prenos en la manojn knuton, por komandi Eŭropon. Kaj tio ne estas novaĵo — rememoru la ambasadon de Ukraincev al Turkio, kiel tie sinjoro angla ambasadoro tiam insidis...

Li aliris al la tablo, apogis sin sur ĝi per ambaŭ manoj:

— Kaj notu por vi, Silvestro, kion ajn ili farus, kiel ajn ili ruzus, kiujn ajn ili trompus — la vortoj ĉiam estas samaj: pro Dia paco sur la tero, por bona komercado kaj profitoj, por amikeco kaj amo inter ŝtatoj... Hipokrituloj, bigotoj, kalumniantoj damnitaj.

Li forportis la sakon en la kabineton — estis aŭdeble, kiel grincis tie seruro, — revenis, diris:

— Ni veturu! Mi montros al vi, kia ŝipo nun estis ekkonstruita...

Elirinte el la domo de la kolegio, Rjabov per nehastaj paŝoj direktis sin al la transportejo, kiu situis nemalproksime de la ligna preĝejeto de Sankta Isaako.

Ĉi tie ĉiam bolis vivo: boatoj navedis inter la Admiralejo, la Bazila, Apoteka, Tomasa insuloj, disveturigante oficistojn kaj metiistojn en la juna urbo. Oficiroj en manteloj kaj trikornaj ĉapoj, kun spadoj, soldatoj kaj matrosoj, vendistinoj kun korboj, popoj, komercistoj, fremdlandaj kuracistoj, ĉarpentistoj, masonistoj, junulinoj kaj maljunulinoj en ajna vetero kutime saltadis en ŝanceliĝemajn Nevajn boatojn, pagadis kopekojn kaj groŝojn pro transportado, la transportistoj lerte remadis per malpezaj remiloj, ĉirkaŭirante ŝipojn, starantajn ĉe la ankroj...

Hodiaŭ jam el malproksime Rjabov rimarkis, ke la kutima bildo ŝanĝiĝis: la tuta bordo ĉe la transportejo estis ĉirkaŭita de surĉevalaj dragonoj, kaj boatoj ne sulkis, kiel kutime, la akvoplenan riveron, sed iris ĉiuj kune, apude, peze ŝarĝitaj per iuj vilaj kaj ĉifonaj homoj.

— Ĉu bagnulojn oni veturigas? — demandis Rjabov-on eta maljunulino, fiksrigardante la boatojn.

— Bagnulojn, patrino, — respondis Rjabov.

— Ĉu multe?

— Ja, vidu, kiom da boatoj — verŝajne, sur ĉiuj estas bagnuloj...

La maljunulino balancis la kapon, viŝis larmon, komencis malnodi tukon, prepariĝante doni almozon. Oficiro, leviĝinte en piedingoj, per laŭta voĉo kriis:

— Eli-i-iru sur la bordon!

La unua boato batiĝis per la rando al tabula planko, la bagnuloj, bruante per ĉenoj, peze apogiĝante unu al la alia, komencis transiri sur la albordiĝejon, el tie saltadis en likvan ĉebordan koton. La dragonoj disiris, la oficiro ree kriis:

— Elirigu, elirigu pli alten, ili tie atendu...

Rjabov ne sukcesis deiri de la vojo — la unuaj vicoj de la bagnuloj per rapidaj paŝoj jam estis irantaj preter li, tute proksime, tiel proksime, ke li eĉ aŭdis pezan spiradon de la homoj. Kaj tute proksime, apogante sin sur bastono, preteriris grizbarba, grizhara homo kun elŝiritaj nazotruoj kaj seka, bruliganta brilo de la okuloj. Tiu brilo de la pupiloj, la kaviĝintaj, kvazaŭ brulvunditaj vangoj, la grandaj bukloj de haroj ion rememorigis al Rjabov, ion antaŭlongan, ion karan kaj proksiman. Li eĉ sufokiĝis kaj, mem ne aŭdante sian voĉon, kriis:

— Silentulo? Haltu, Silentulo!

La grizbarba bagnulo rapide turniĝis, deziris halti, sed oni puŝis lin al la dorso, kaj li ekpaŝis pluen, bruante per siaj ĉenoj, alte tenante la senĉapan buklan kapon.

Rjabov, kvazaŭ juna, ĵetiĝis post li, depuŝis soldaton, kaptis Silentulon je la maniko de kaduka, flikita kaftano. Tiu ree retrorigardis kaj per tre ĝoja, sed trankvila voĉo diris:

— Kaj mi pensis, ke misrekonis. Nu, saluton, rudristo...

— Pli rapide! — de sia ĉevalo kriis la oficiro. — Pa-asu!

La bagnuloj ĉiam eliradis kaj eliradis sur la bordon, paŝadis rapide sub krioj kaj insultoj de eskortantoj, etendiĝis per longa

griza rubando. Unu soldato deziris premi Rjabov-on flanken, sed ektimis lian rigardon kaj ekkuris laŭlonge de la kolumno, kvazaŭ okupita de alia, pli grava kaj urĝa afero.

— Do, renkontiĝis ni, — diris Silentulo dum irado, fiksrigardante la rudriston per atenta, karesa kaj ruza rigardo. — Jen, kiom multe da tempo pasis, sed ni estas plu vivaj. Sorto...

— Vere sorto! — penante adaptiĝi al la pezaj, sed egalaj paŝoj de Silentulo, ripetis la rudristo. — Ne mortis...

— Mi pensis, ke tiam ne postvivos vi. Forte vin la svedo karesis. Kaj ĝis nun mi memoras: tuŝis ni vin tiam — por sur ĉaron kuŝigi, kaj el vi ree sangego fluas, ho-o! Ni staras, pensas — ĉu vi mortos aŭ ne. Teodozo forpasinta kalkulis — dek sep vundoj estis...

Rjabov iris apude, rigardante flanken.

— Sed kial vi de mi forturniĝas? — demandis Silentulo. — Kial vi al mi ne rigardas?

— Tial ne rigardas, — kvazaŭ strecînte la fortojn, respondis Rjabov, — tial mi al vi ne rigardas, ke jen eĉ nun mi estas viva kaj sana, sed vi estas katenita, kaj brulstampita, kaj la nazotruoj ĉe vi estas elŝiritaj, kaj la fingroj estas hakitaj. Sed ja por la homoj, por mi, por nia vero kaj justo vi kaj Teodozo Forĝisto mortan turmenton akceptis, kiam la petskribon veturigis al la caro...

Silentulo subridis, suspiris, balancis la kapon.

— Ne, amiko kara, — diris li karese, — ne, Ivano Sabateiĉ, ne pro tio oni min knutis senkompate, ne pro vi oni elŝiris la nazotruojn kaj la fingrojn forhakis: tiam foriris mi, ho, lerte

foriris, per via oro foriris kaj longe, kara, en la mondo mi promenis — dibocîs. Ho-o, kiel mi dibocîs!

Liaj okuloj ree brilis per seka fajro:

— Glore mi dibocîs, multaj min, probable, eĉ ĝis nun per bona vorto rememoras! Estis mi malproksime, kaj ĉe Volgo-patrino, kaj ĉe Dono kvieta. Multaj niaj fratoj estas tie — kaj soldatoj fuĝintaj, kaj kozakoj, kaj laboruloj, kaj liberaj servutuloj, kaj mizeruloj...

Rapide, flustre li demandis:

— Pri Baĥmuta hetmano Bulavin[165] ĉu vi aŭdis?

Kaj, ne atendante respondon, diris:

— Li mem ja nun ne estas viva. Li estis hetmano de la Granda Dona Kozakaro. Nu, kia homo! Kun li mi estis dum la tuta tempo, ribeligadis mizerulojn. Sed perfidis oni nin... Kaj tiam mi ankoraŭ foje eskapis, saviĝis. Tiom mi vidis — por aliulo eĉ por tri vivoj sufiĉus...

Li enpensiĝis, poste kun mallaŭta furiozo en la voĉo demandis:

— Ĉu vi pensas, ke mi ne foriros? Tiele ĉi tie restos? Ses fojojn mi foriradis, foriros ankaŭ en la sepa. Ĉirkaŭrigardi nur necesas, eskapi sen miso, alie oni la kapon forhakos. Ne, mi, amiko kara, foriros, ĝisdibocos mian vivon...

La dragona oficiro trote devancis la bagnulojn, kriis al Rjabov:

— Kial vi estas ĉi tie? He, flanken!

---

165 Hetmano Kondrato Bulavin estis gvidanto de kozaka ribelo en 1707 *(trad.)*

Li preterrajdis pluen, svingis skurĝon al juna bagnulo, kiu peze trenis siajn ĉenojn kaj neniel povis atingi sian vicon.

Rjabov rapide serĉis en la poŝoj, trovis malgrandan monon, donis al Silentulo kune kun la pako, kiun kolektis Taisja. Tiu tuj prenis flanon, skuis sian buklan kapon, adiaŭis:

— Nu, rudristo, iru, alie misfortune skurĝos vin nia diablo. Eble, ni ne plu renkontiĝos. Niaj vojoj estas malsamaj. Sed tamen memoru: se iĝos neelteneble — fuĝu al Volgo.

Maĉante la flanon, li dum irado ĉirkaŭrigardis la ĉielon, la grizajn Nevajn akvojn, la arbaron, kiu dense nigris tuj post la preĝejeto de Sankta Isaako, prononcis kun miro:

— Jen, kien oni enpelis nin: Sankt-Piterburgo...

Kaj, levinte per la mano kun dehakitaj fingroj la ĉenojn, ne turniĝante plu al Rjabov, li rapide ekpaŝis kun siaj bagnuloj. La oficiro, turniĝante en la selo, trostreĉante la gorĝon, kriis:

— Turnu vin! La antaŭaj maldekstren, al la ŝipkonstruejo! Li-i-ven!

Kaj kvazaŭ estis nenia Silentulo, kvazaŭ ĉio ŝajnis — malaperis kaj dragonoj kaj bagnuloj, nur el malproksime ĉiam pli malforte aŭdiĝadis egalmezura tintado de ĉenoj.

«Al Silvestro Petroviĉ! — pensis Rjabov. — Ĉu iri, peti? Ja li estas parenco, propra! Aŭ al Apraksin? Al Petro Aleksejeviĉ mem?»

Hejme li rakontis al Taisja pri la renkontiĝo kun Silentulo. Ŝi elaŭskultis ne interrompante, viŝis larmojn, diris certe:

— Neniu helpos! Kaj ne bezonas li ilian pardonon! Li ne akceptos...

La piloto sidis sur la benko silente, ĝibetiĝinte, mallevinte la kapon. Taisja ekstaris, alportis el la kelo stofbotelon kun malvarma riba vodko, tranĉis fumaĵitan fiŝon, vokis:

— Venu, Sabateiĉ, ripozu!

Kaj ŝi mem, per sia maldika, ĝis nun malpeza mano, verŝis por li grandan, pezan glason da vodko. Li eltrinkis — ŝi verŝis ankoraŭ. Kaj demandis:

— Ĉu pli facile?

— Ne! — respondis li, frotante la bruston. — Doloras, Tainjo!

El Arĥangelsko la eskadro kun junaj navigistoj eliris la 7-an de junio de la jaro 1720. Sur la fortikaj remparoj de la Novdvina fortreso trifoje bojis kanonoj, salutante la ŝipojn, irantajn en foran navigadon. «Gabrielo» — la flagŝipo de la eskadro — respondis al la saluto same per tri pafoj. Vicadmiralo Ievlev, kapitan-leŭtenanto Pustovojtov kaj Rjabov kun la junaj navigistoj kunvenis apud la ĉefmasto.

— Liven je du gradoj! — ordonis Rjabov al la filo, staranta ĉe la stirrado.

Kaj klarigis:

— Malprofundaĵo estas ĉi tie, mi scias laŭ la malnovaj tempoj.

La okuloj de leŭtenanto Rjabov eklumis, li movis la stirradon, la junaj navigistoj ekinterflustris ĉirkaŭe — rememoris la historion de la heroaĵo de rudristo Ivano Sabateiĉ. La ŝipoj de la eskadro, kliniĝante sub plena vento, kuris al la

Dvina buŝo. Ĉe la skansoj Ievlev ion nelaŭte diris al Pustovojtov, tiu ordonis mallevi la flagojn. La navigistoj liniiĝis kun la vizaĝoj al la dekstra ŝiprando, ekstaris atente. Silvestro Petroviĉ trairis laŭlonge de la linio, prononcis, akompanante per la okuloj la skansojn:

— Ĉi tie heroe pereis kapitano Krikov Atanazio Petroviĉ, ĉi tie li glore kun siaj soldatoj batalis kontraŭ la malamiko. Pri tio vi, estontaj flotaj oficiroj, rememori hodiaŭ devas.

Dum plej granda parto de la vespero kaj preskaŭ ĝis la noktomezo Ievlev en la salono rakontadis al la navigistoj pri la antaŭlonga batalo kontraŭ la svedoj sur Dvino. Li parolis tiel, kvazaŭ li tiam tute ne ĉeestis, sed la navigistoj konis la pasintecon de sia vicadmiralo kaj aŭskultis avide, iam ĵetante rigardojn al la rudristo, kiu fumis pipon, sidante flanke kaj iam enmetante iujn notojn.

— Multe da gloraj eventoj okazis post tiama malproksima tempo, — konkludis Silvestro Petroviĉ, — grandegaj viktorioj estis gajnitaj per la rusa armilaro. Memoras vi kaj Poltavon, kaj Hanguton, kaj la viziton de la Rusia floto al Kopenhago, kiam la honoro de komandado de la unuigita floto apartenis al nia Siro Petro Aleksejeviĉ. Sed tamen, sinjoroj navigistoj, devas vi memori ankaŭ tiun ĉi nian Dvinan batalon, ĉar per ĝi komenciĝis nia moviĝo al la Balta maro, el ĉi tie ni ekiris en tiuj malproksimaj jaroj al Njuĥĉo, poste — trene al Ladogo. Ĝuste tiam ni certiĝis pri niaj fortoj. Se vi deziros pli detale ĉion ĉi ekscii — ni ankoraŭ konversacios en libera tempo. Kaj scii ĉion vi bezonas — ĉar kia flota oficiro povas fariĝi el homo, por kiu estas enua la glora pasinteco de la patroj kaj avoj, iliaj batalaj agoj, milita laboro. Kaj nun, sinjoroj miaj,

necesas dormi, ni sidas tro malfrue, sed morgaŭ estos frua vekiĝo — laŭ la mara moro, kaj postuli de vi mi komencos kiel de veraj flotaj oficiroj.

La navigistoj leviĝis, sed tamen ne foriris. Ies timida voĉo demandis pri la preno de Noteburgo — kiel tio estis. Silvestro Petroviĉ kun subrido respondis, ke pri tio estas atestanto leŭtenanto Rjabov Ivano Ivanoviĉ, alnomata «Nerompebla decido». La rudristo ekridis en sia angulo. Ivano Ivanoviĉ, ruĝiĝinte, pinĉante la lipharojn, komencis ion diri, sed la rudristo interrompis, demandinte:

— Ĉu dronis la tamburo? Nur la frapiloj restis? Sed kiel ĝi dronis ja, kiam ĝi devas flosi?

— Sed kiomfoje mi, paĉjo, rakontis, — kaj kolerante kaj ridante, respondis Ivano Ivanoviĉ. — Oni trapikis ĝin al mi per sabro, tial ĝi dronis...

Silvestro Petroviĉ ridis, la rudristo viŝadis gajajn larmojn. Poste oni komencis rememori aliajn batalojn, ĉiu el la junaj navigistoj ion aŭdis, ĉe multaj el ili patroj, fratoj, onkloj, avoj servis en la ŝipa aŭ en la galera flotoj, en artilerio, en gvardio, en infanterio, en grenadistoj.

Ekde la mateno komenciĝis ordinara flota vivo. Ievlev, Jegoro Pustovojtov, la juna Rjabov faradis ekzercadon kun la navigistoj, tiuj laboris kaj kiel matrosoj, kaj kiel kanonistoj, kaj kiel navigistoj: grimpadis sur mastojn, metadis kurson por la ŝipoj, kvazaŭ ŝargadis kaj pafadis per ŝipaj kanonoj, trovadis altojn de astroj.

En vesperaj horoj la navigistoj longe aŭskultadis la rudriston. Sidadis sur la pruferdeko, fumadis per pipoj,

pririgardadis nubojn, ondojn, lernis aŭskulti voĉojn de ventoj. Samloke sidadis ankaŭ la vicadmiralo.

Dum preterpasado de Bornholmo la eskadron trafis kruela ŝtormo.

Jegoro Pustovojtov trankvile staris sur la pobferdeko, komandis la ŝipon. Silvestro Petroviĉ estis samtie, eĉ unu fojon ne enmiksiĝis ordonojn de la ŝipestro de la flagŝipo — al Jegoro eblis kalkuli. Rjabov, pipre ŝercante pri la marmalsanaj senspertaj navigistoj, rakontadis al ili pri tio, kio kaj por kio estas farata sur la ŝipo. Ili aŭskultis distrite, ĝemadis, sed ne kuŝiĝadis kaj, kiam la ŝtormo pasis, longe ne kredis kaj al la blua ĉielo, kaj al la kvieta maro...

Kopenhago renkontis la rusan eskadron per saluta salvo. Tuj tondris respondaj salvoj, de la kajo deiris gigo de la dana havenestro.

— Kiom multe da popolo eliris! — diris la rudristo, fiksrigardante per la ankoraŭ akrevidaj okuloj la bordojn de haveno Christianshavn, de kiuj aŭdiĝis salutaj krioj de danoj. — Preskaŭ la tuta urbo. Kaj ankoraŭ iuj kuras, nu-nu, kiom da popolo...

— Kaj kial ili ne kuru? — respondis Pustovojtov. — Ili, kompatindaj, preskaŭ unu solan esperon havas pri ni, alie la svedo ilin entute plene kaj komplete voros...

Sur la pobkastelo tamburoj mallonge batis «renkonton», Silvestro Petroviĉ en uniformo, kun spado, en trikorna ĉapelo, en blankaj striktaj gantoj aliris la paradan ŝtuparon. La dano — havenestro, maldika maljunulo en blua kaftano, en blankaj ŝtrumpoj, — ekvidinte la rusan vicadmiralon, paliĝis pro

emocio, sed tuj, ekreginte sin, respondis al ĝentila demando pri sano de la reĝo kaj mem demandis, ĉu estas sana lia sanktoleita moŝto Siro Petro.

— Lia cara moŝto estas en bona sano! — respondis Ievlev kaj invitis la havenestron pasi en la admiralan apartamenton kaj ne neglekti regalon.

La tamburoj ree batis «paradon».

La havenestro eniris en la kajuton de Silvestro Petroviĉ. Ĉi tie en arĝenta karafo staris rusa vodko, kaviaro en same arĝenta kruĉeto, en korbo — sekalaj ŝipaj biskotoj.

— Je la sano de via moŝto! — prononcis Ievlev, levante glaseton.

— Je la sano de via Ekscelenco! — respondis la dano.

Ili tintigis la glasetojn. Tra la malfermitaj fenestroj venis sonoj de muziko de la bordo, malproksimaj ĝojaj voĉoj.

— Ĉu en la dana reĝlando nun estas festo? — demandis Silvestro Petroviĉ.

— Jes! — respondis la maljunulo. — Granda festo! La rusa eskadro vizitis la ĉefurbon de Danio. La veno de tiuj, kiuj helpos al ni deĵeti la svedan jugon, estas granda festo!

La fingroj de la havenestro facile ektremis, li metis la eltrinkitan glaseton sur la tablon, fiksaŭskultis: vento de la bordo ree alportis fragmenton de gaja kanto, sonojn de klarionoj.

— Tiel renkontas vin Kopenhago, — ree ekparolis la havenestro. — Antaŭ dek naŭ jaroj la sveda eskadro survoje al via urbo Arĥangelsko estis ĉi tie. Neniu dano aperis tiam en la

haveno. Kaj mi grimpis sur la flagŝipon de la svedoj per ŝnureskalo, ebriaj matrosoj mokis min. Por humiligi mian patrujon, min akceptis ferdekestro... La afero estas ne en mi, sinjoro vicadmiralo, ho ne, la afero estas en mia ŝtato. Ĉiuj esperoj, ĉiuj atendoj, ĉiuj aspiroj de nia popolo estas ligitaj kun Rusio, kun proksimaj tagoj de ĝia plena kaj fina viktorio super la damnita ŝvela araneo — super Svedio. Dio helpu vin, kiel vi helpos al la dana reĝlando.

Momenta rideto, saĝa kaj subtila, apenaŭ tuŝis la lipojn de Silvestro Petroviĉ.

— Tamen en proksimaj tagoj la reĝlando dana subskribis pacan traktaton kun la svedoj, — prononcis li, — por kio?

— La floto de siro John Norris devigis senkuraĝulojn, — respondis la havenestro, — kaj la sama floto liveris en Kopenhagon anglajn sterlingajn pundojn, por konkeri avidulojn. La angla reĝo deziras daŭrigon de la milito inter la rusoj kaj la svedoj kaj faras por tio ĉion, kion povas, sed ajna honesta homo en Danio atendas nur unu aferon: venkon de la rusoj...

Silvestro Petroviĉ riverencis.

— Hodiaŭ Kopenhago havos honoron akcepti gastojn, karajn por niaj koroj, — diris la havenestro. — Pordoj de ĉiuj domoj estos malfermitaj por viaj oficiroj kaj matrosoj. Nia urbestro ĝojos vidi vin ĉe si, sinjoro vicadmiralo.

— Sed kiel tion rigardos la ambasadoro de Anglio? — demandis Ievlev.

La maljuna havenestro pensis nelonge, poste skuis la kapon, prononcis gaje:

— Eblas aĉeti avidulojn kaj timigi senkuraĝulojn, sed estas nepenseble igi la popolon forgesi tiun bonon, kiun faris por ĝi la rusoj. En nia reĝlando ne estas eĉ unu homo, kiu ne scius, ke la rusa caro en la Alanda kongreso ne lasis al la svedoj disŝiri nian landon. Rusaj plenrajtaj ministroj pli zorgis pri nia estonteco, ol...

Li svingis la manon kaj ne findiris.

— Mia oficiro sciigos vian Ekscelencon, — diris poste la havenestro, — pri la tempo, kiam ĉio estos preta al akcepto de viaj ŝipanaroj. Ĝis revido, sinjoro vicadmiralo...

La oficiro leviĝis sur «Gabrielon» nur vespere. Ievlev kun subrido demandis la leŭtenanton, ĉu ne estas nun malfrue ellasi matrosojn en la urbon? Tiu, konfuziĝinte, respondis, ke li komprenas tutan maldececon de tiom longa prokrasto, sed Danio estas malgranda lando, kaj la ambasadoro de Anglio estas obstina homo...

La suno jam subiris, kiam sur ĉiuj tri ŝipoj de la rusa eskadro ekkantis klarionoj, sciigante la ŝipanarojn pri tio, ke ili povas veturi al Kopenhago. Matrosoj ekŝutiĝis en remboatojn. Super la kvieta maro larĝe kaj libere eksonis rusa kanto:

Strato, mia strato, larĝa mia strat',
Herbo, mia herbo, verda mia herb'!

Sur ponto Knippelsbro irantajn en ordo matrosojn renkontis junulinoj en blankaj vestoj, kun florkronoj sur la kapoj, kun grandaj floraj bukedoj. La matrosoj haltis, la junulinoj per altaj, ĉarmaj voĉoj kantis nekompreneblan kanteton. La maristoj staris, ne sciante, kion fari, tenante la trikornajn ĉapelojn en la manoj, kiel en preĝejo. Super la urbo estis malrapide leviĝanta

plena luno, la junulinoj plu kantis kaj kantis. Poste antaŭen eliris viro kun ruĝa vizaĝo, en peruko, ĉe liaj flankoj ekstaris du knaboj kun torĉoj, la viro komencis kun hurlo laŭtlegi longan folion.

— Poeto! — klarigis la juna Rjabov al la patro.

— Videblas, ke po ete, — subridis la rudristo. — Drinkis li multe po ete dum sia vivo!

Tuj kiam la poeto finis, super la urbo, super ĝiaj tegolaj tegmentoj, super turoj kaj ĝardenoj ekflugis raketoj, ekludis laŭta korna muziko, ekbatis timbaloj, timpanoj, ekkantis violonoj. La muzikistoj staris laŭlonge de la stratoj, pordoj de ĉiuj domoj estis malfermitaj, frizitaj daninoj en kufoj, ruĝvangaj, blankdentaj, riverencadis al la rusaj matrosoj, ridinde genufleksadis, danoj en festaj kaftanoj, en ŝtrumpoj kaj ŝuoj, kondukadis rusajn matrosojn en domojn al tabloj, drinkaĵo, almanĝaĵo, al bona, satiga manĝo. Rusaj matrosoj, ĝeniĝante, po unu eniradis en domon, tusetante en pugnon; ĉirkaŭrigardadis, divenadis, per kio vivas la mastro: unu estas botisto, jen lia ilaro sub la fenestro, alia estas forĝisto — videblas laŭ la manoj, laŭ leda antaŭtuko, kiu pendas en la vestiblo, tiu ĉi estas ĉarpentisto... Drinkinte unu aŭ du glasetojn, matroso kun tuta ĝentileco demandadis, montrante per la manoj: ĉu vi rabotas? La dano ĝoje kapjesadis, la matroso, fingromontrante al sia brusto, prenadis de la tablo panpecon, montradis: jen, mi semas, estas kampulo. Poste la mastrino, ĝeniĝante pro la gasto, kantis kanton de sia lando, la matroso kaŝe viŝadis larmojn, rememorante malproksiman panjon, kiel ankaŭ ŝi kantadis en la patrujo. La danino same viŝadis larmojn, — ankaŭ ŝia plej aĝa filo navigas kiel maristo,

kaj la maro estas malica...

Rusaj matrosoj ne sufiĉis por ĉiuj, danoj kverelis, petis la rusan matroson sidi ankoraŭ en du domoj, — tie, ili diris, oni atendas, maljuna avo deziras rigardi, insultas, ke li mortos, ne vidinte, kaj iri li jam ne povas, la piedoj ne paŝas. Kaj la infanoj ploras — ili eksidis al la tablo, sed ruso mankas... Kial al iuj en ĉio fortunas, kaj aliaj en nenio havas bonŝancon? Ili femuraĵon rostis sur stango, sed la najbaro ne donas sian rusan gaston, ĉu tio taŭgas?

Rjabov kun la filo vizitis kvin domojn, kaj en la sesan ne iris, laciĝis. La dano, restinta sen rusa gasto, diris, ke se tiel, li nun hejmen ne iros, sed direktos sin al la rusa ŝipo, nun por li ne estos vivo hejme, li estas la lasta homo sur sia strato. Rjabov kompatis la bonan maljunuleton, vizitis ankaŭ lian familion, manĝis ankaŭ ĉi tie stufitan porkaĵon, drinkis glaseton je la mastrino, invitis al si en urbon Sankt-Piterburgon, sur la Bazilan insulon, en la propran domon.

— Ni same regalos, — diris li, — ĉu vere, Ivaĉjo? Ĉe ni, frato, estas specialaj pirogoj, tia afero, vi ne komprenos. Pi-ro-goj!

— *Kuchen*! — diris la juna Rjabov.

— Kuĥen! — konfirmis la rudristo kaj larĝe dismetis la manojn. — Jen, frato, kia kuĥen! Mia edzino estas majstrino, kiam ŝi bakos, vi aĥos! Kaj vi, kara, ne pensu, prepariĝu kaj venu. Per maro veturi ja ne estas tro longe, vi baldaŭ venos...

Al domoj venadis muzikistoj, ludadis solidajn, malrapidajn dancojn, en ĉambroj iĝis malvaste, oni dancis sur stratoj. Ĉe mateniĝo la gastoj el la rusaj ŝipoj, danaj matrosoj, metiistoj,

komercistoj, daninoj kun filinoj, kun malgrandaj infanoj sur la manoj, gravmienaj ministroj de la reĝa kortego, pompe vestitaj ambasadoroj kaj senditoj, rezidentoj kaj edzinoj de altrangaj personoj en riĉaj kaleŝoj, rajde sur altaj ĉevaloj, — ĉiuj kunvenis sur la placo de la Urbodomo: iuj por gaji, aliaj por rigardi, kiel oni gajas. Ĉi tie, sur la placo, flamis peĉaj torĉoj, danoj dancadis dancon kun saltetoj kaj kaŭriĝoj. Junulinoj kaptadis je la manoj rusajn matrosojn, tiradis en la rondon. Tiuj unue rezistis, poste, vigligataj de amikoj, iris en rondodanco.

— Kiu estas tiu, kiu staras tie flanke? — demandis Silvestro Petroviĉ la urbestron. — Jen, apud kaleŝo. Ĉiam sola. Kiu li estas?

La urbestro respondis kun suspiro:

— Siro Reger Ripley — la rezidento de la angla reĝlando...

— Reger Ripley? — preskaŭ trankvile redemandis Ievlev. — Ĉu li ne estis en Rusio?

— Li estis ĉie, — diris la urbestro. — En malproksimaj tempoj li vendadis kanonojn. Tamen, ankaŭ nun li vendis al la svedoj nemalmulte da pafarmiloj...

Silentinte iom, la urbestro ankoraŭ foje suspiris:

— Certe, ni ne devus inviti lin en la feston, sinjoro vicadmiralo, sed ne juĝu min severe: estas malfacile esti urbestro de ĉefurbo de malgranda reĝlando...

Kiam Silvestro Petroviĉ kun siaj oficiroj estis revenanta sur la ŝipon, lin atingis la havenestro. Estis jam tute hele, la tago promesis esti serena, la suno, ĵus leviĝinte, tuj komencis

varmigi tegmentojn, murojn de domoj, ŝtonojn de pavimoj.

— Bona tago venas kaj portas bonajn informojn! — prononcis la havenestro. — Bonaj informoj, sinjoro vicadmiralo. Tre bonaj informoj...

La maljunulo, anhelante, haltis, viŝis la vizaĝon per tuko. Haltis ankaŭ Ievlev kun la oficiroj.

— Lia Ekscelenco admiralo Golovin en batalo ĉe Granhamn plene frakasis la svedan floton, — diris la havenestro. — Kvar svedaj ŝipoj kapitulacis, estis prenitaj pli ol cent kanonoj kaj ĉirkaŭ kvincent kaptitoj. Ĉi viktorio estis gajnita malgraŭ tio, ke apud la batalo krozis angla floto sub komando de siro John Norris. Vivu, sinjoroj!

— Vivu! — ekkriis la oficiroj. — Suprenĵetu la havenestron!

Fortikaj manoj subkaptis la maljunulon, la trikorna ĉapelo falis de lia kapo, poste falis ankaŭ la peruko.

— Mi dankas vin, sinjoroj! — ekkriadis li. — Mi tre dankas! Sed ĉi afero ne estas tro utila por mi...

La sciigo pri la nova viktorio tuj disflugis sur ĉiuj tri ŝipoj de la eskadro. Matrosoj eksciis detalojn de la batalo, navigistoj dismetis marajn mapojn, divenante, kiel ĉio okazis. Jam estis sciate, kiel trafis la sveda eskadro en malvastaĵon inter malprofundaĵoj, kiel Golicin ordonis komenci ŝipatakon, kiel saviĝis la sveda admiralo. Oni diris ankaŭ pri la anglaj ŝipoj, kiuj ektimis fari helpon al siaj amikoj.

En la kajuto de Silvestro Petroviĉ sidis ĵus veninta ambasadoro Bazilo Lukiĉ Dolgorukov, matroso-barbiro estis razanta lian korpulentan, dikan vizaĝon kun tri mentonoj. La

diplomato rakontis:

— La angla reĝo malŝparis tro multan monon por sia eskadro en la ĉi-lokaj akvoj, li mem plendis, ke pli ol sescent mil pundojn al li kostis Norris, sed timas la reĝo nian dominadon sur maroj. Multaj fidelaj homoj diras, ke la svedoj estas pretaj por paco, sed nur la angloj ne lasas fariĝi al tiu paco, esperigas per helpo, iam eĉ timigas...

La barbiro foriris, Bazilo Lukiĉ dolĉe tiris sin, mallarĝigante la saĝajn okuletojn, prononcis:

— Ho, kiom facile estas en la animo, kiam mi troviĝas en propra hejmo, kvankam ĉi hejmo sur ŝanceliĝema akvo staras. Laciĝis mi, sinjoro vicadmiralo, tiel laciĝis, ke eĉ vortojn ne havas por priskribi. Iam kun forpasinta Izmajlov ni pri tio konversaciis: ne estas afero pli malfacila, ol la nia — diplomatio...

Je la kvara horo posttagmeze Silvestro Petroviĉ kun Dolgorukov eliris sur la bordon por renkonti ĉerkon kun restaĵoj de princo Andreo Jakovleviĉ Ĥilkov. Sur la albordiĝejo jam staris rusaj matrosoj en paradaj uniformoj kun prezentitaj fusiloj. La ponto kaj la kajoj de la haveno estis inunditaj de homamasoj de loĝantoj de Kopenhago. Laŭlonge de la tuta vojo, sur kiu devis sekvi la funebra procesio, viciĝis danaj soldatoj en siaj mallongaj uniformaj jakoj, en lakitaj trikornaj ĉapeloj kun kokardoj.

— Jen, kiom da soldatoj ili starigis! — morne rimarkis Dolgorukov. — Por ajna okazo sinjoroj danaj ministroj zorgigis sin...

— La popolo ĉi tie honoris nin eksterordinare! — diris

Ievlev. — Vere kun malfermita animo...

— Tio estis popolo, kaj tio estas ministroj, — interrompis kolere Dolgorukov. — Ministrojn oni ĉi tie per pundoj aĉetas...

La plumban ĉerkon kun la korpo de Andreo Jakovleviĉ Ĥilkov, suferinta en kaptiteco dum dek naŭ jaroj, oni veturigis sur kanona afusto, jungita per nigraj ĉevaloj. Rajdantoj en nigraj funebraj vestoj, en kaskoj kun nigraj plumoj, en nigraj armaĵoj estis akompanantaj la ĉerkon, tenante en la manoj po unu renversita estingiĝinta torĉo. Facila varma vento flirtigadis la plumaĵojn, flagetojn kaj standardojn, portis odoron de algoj, odoron de proksima maro.

Malrapide batadis tamburoj, solene kantis klarionoj, trumpetis trumpetoj.

Konsilisto de la ambasado — same en nigra vesto — portis sur velura kuseno volvaĵon, ligitan per ŝnureto kaj sigelitan per ruĝa sigelvakso. Tio estis la verko de la mortinta Ĥilkov, lia historio de Rusio. Ankoraŭ oni portis sur la kuseno plumon, flaviĝintan kaj rompitan, per kiu skribadis Andreo Jakovleviĉ, kaj simplan inkujon, kiu akompanadis lin en longaj vojaĝoj en svedaj prizonoj.

Kiam la pezan plumban ĉerkon oni levis sur la pobkastelon de «Gabrielo», Pustovojtov svingis tukon. Matrosoj akorde pafis per fusiloj, tondris kanonoj de la eskadro kaj ĉiuj danaj bordaj baterioj. Silvestro Petroviĉ kun Rjabov kovris la ĉerkon per la rusa flago, kvar matrosoj ekstaris kiel honora gardo.

— Jen ni hejmen preparis Andreĉjon, — diris Dolgorukov, reĝustigante faldojn de la flago. — Li vagis kaj turmentis sufiĉe...

Al Ievlev aliris la maljuna havenestro, ekparolis en la dana:

— Ricevis mi, sinjoro vicadmiralo, plej certajn informojn: la floto de admiralo Norris forlasis la akvojn de la Botnia golfo kaj nun krozas nemalproksime de niaj bordoj. Ĉu indas por vi foriri hodiaŭ? Li havas pli ol kvardek vimplojn, sub via komando estas nur tri ŝipoj. La vojoj de Dio estas nediveneblaj...

— La floto de Norris estas nemalproksime, sed ankaŭ nia Balta, mi pensas, ne dormas! — laŭte diris Dolgorukov. — Antaŭ nelonge mi estis proksime de la Alandaj insuloj: kaj batalŝipojn kaj aliajn ceterajn ŝipojn sub la Andreaj flagoj mi vidis per la propraj okuloj, kun plezuro admiris. Ne, sidi ĉi tie plu ne indas, ni gastis — kaj tempas reveni hejmen.

Vespere la rusa eskadro, uzinte favoran venton, levis la ankrojn kaj foriris en la maron. En la admirala kajuto Silvestro Petroviĉ kaj Dolgorukov ĉe kandela lumo estis ordigantaj foliojn de la manuskripto de forpasinta Ĥilkov kaj lace interparoladis. Estis aŭdeble, kiel sur la pruferdeko kantas matrosoj. Bazilo Lukiĉ diris reveme:

— Je Dio, kvazaŭ sonĝon mi vidas: kvazaŭ mi estas hejme.

— Ĝis la hejmo estas ankoraŭ ne proksime.

— Kiel ne proksime, kiam ili nian kanton kantas!

Kaj per alta voĉo li kunkantis:

Litkovrilo nia estu vent' sovaĝa...

— Laŭ ĉi paĝoj videblas, kiel li, kompatinda, skribis! — diris Silvestro Petroviĉ. — Vidu, Bazilo Lukiĉ, — fulgo, fumaĵo, vidu, kiel makulita. Vakso gutis...

Gardeme tenante en la manoj paperan folion, Silvestro Petroviĉ legis laŭte:

«En la dudek sepa tago de junio ĉe urbo Poltavo de caro Petro Aleksejeviĉ, kiu mem persone tiam la armeon komandis, la reĝo sveda estis forpelita kaj liaj trupoj venkitaj, kie da ili pereis multe...»

Dolgorukov apogis sin per la mano, prepariĝis aŭskulti plu. Fenestroj al la galerio de la admirala kajuto estis malfermitaj, tie estis maltrankvile, peze turniĝantaj ondoj de la Balta maro. Silvestro Petroviĉ legadis foliojn unu post alia, egalmezure bruadis la maro, interkriadis vaĉantoj, batadis sonoriloj, matrosoj sub mallonga krakado de tamburoj ŝanĝadis la gardon ĉe la ĉerko de Ĥilkov.

«Kiom grandan perdon suferis tiam la svedaj trupoj, — legis Silvestro Petroviĉ, — kiuj jam ĉian potencon en la mondo neniom respektis kaj ĉiujn reĝojn detronigi havis fortojn...»

Bazilo Lukiĉ flustris mallaŭte:

— Estis, estis! Sed baldaŭ kio estos? Aĥ, ne orgojlu, ne orgojlu, vi krevos...

— Kio? — demandis Ievlev, ne distinginte.

— Ne gravas, amiko, legu plu, — diris Dolgorukov. — En la fremda lando estante sola, kutimiĝis mi paroli kun mi mem... Legu.

«Kaptitaj estis dek naŭ mil homoj, inter kiuj estis generalo feldmarŝalo Rehnskiöld, grafo Piper, generalo Lewenhaupt... En la sama jaro en monato decembro la turka sultano Aĥmed laŭ instigo de la reĝo sveda, kiu sidis en Bendero...»

— Jen kiu la stultan turkon instruas, — ree interrompis Dolgorukov, — jen kiu al lia malico estas la unua indulganto.

Ievlev ree eklegis, Dolgorukov ankoraŭ foje interrompis:

— Ĉu vi mem en Svedio elŝipiĝis?

Silvestro Petroviĉ kapjesis:

— Kaj apud Stokholmo en urbeto Gryt kun trupo, kaj ankoraŭ en urbetoj Östhammar kaj Öregrund. Estis mi ankaŭ kun general-admiralo Apraksin je sep mejloj de Stokholmo mem, tie estis urbeto nomata Waxholm...

— Ĉu ne plaĉis al la svedoj?

— Kio do povus plaĉi! — ridetis Silvestro Petroviĉ. — Malprofitoj por ili je dek du milionoj.

— Kiel ekhurlis riĉuloj svedaj, — diris Bazilo Lukiĉ. — Kiel ĝemis. Sed ne gravas, baldaŭ estos la fino, baldaŭ. Se ne la angloj, ni antaŭ longe ĉion solvus...

Frumatene sur la flagŝipo la observanta matroso de la topo kriis:

— Ŝipoj ĉe la dekstra flanko!

Jegoro Pustovojtov rigardis per lorno kaj flustre insultis: transverse estis iranta forta eskadro. Silvestro Petroviĉ leviĝis sur la pobferdekon, prenis de Pustovojtov la lornon kaj tuj komprenis la danĝeron: la eskadro estis angla, tiu de admiralo Norris; en la okulario malrapide trapasis la avangardo, poste la centro, poste la finantaj ŝipoj de ariergardo. Estis videble, kiel anglaj matrosoj grimpas sur stajoj, kiel artileriistoj malfermas kanonajn truojn. Senhaste, retenante emocion, Silvestro

Petroviĉ legis flagan signalon. La angloj proponis kapitulaci sen sangoverŝo.

— Ĉu respondi? — demandis Pustovojtov.

— Respondu, sinjoro ŝipestro: «Vidas klare».

Kajut-vaĉanto alportis al Silvestro Petroviĉ uniformon, spadon, portepeon. Vestante sin, Ievlev legis novajn signalojn de la angloj: «Al batalo havi plenan pretecon, Dia favoro estas kun ni!»

— Malfacila afero, — diris Jegoro. — Jen, kiom ili havas da vimploj.

— Malfacile, sed nenion eblas fari, — penseme respondis Silvestro Petroviĉ, fiksrigardante manovrojn de la anglaj ŝipoj: nun ili iris en batala ordo. — Nenion, frato Jegorĉjo, eblas fari! — ripetis Ievlev kaj per alia — firma, admirala voĉo ordonis levi topmastajn flagojn, signifantajn: «Al batalo pretas!»

Jegoro metis la manon sur la tenilon de la spado, kriis laŭte:

— Preparu la ŝipon al batalo! Batalan alarmon! Bramvelojn for, frontvelon kaj ĉefvelon brajli!

Rule, kun krakado ekbatis tamburoj, ekkantis signalaj klarionoj, ekfajfis ferdekestraj fajfiloj. De malantaŭe al Ievlev, anhelante, aliris Dolgorukov, demandis:

— Ĉu angloj?

— Ili, Bazilo Lukiĉ. Mi pensas, ni batalos.

— Ja kiel ne batali, se ili atakas! Kial vi al mi rigardas? Ne, amiko, nun mi estas ne diplomato, sed rusa homo, baptita Baĉjo kaj ofendon ne toleranta. Se batali — do batali!

Pustovojtov ree tondre kriis:

— Sinjoroj oficiroj, sur la pobferdekon al la vicadmiralo!

La oficiroj kunvenis momente. Ĉiuj jam sukcesis vesti sin parade por la batalo: uniformoj kun brodaĵo, trikornaj ĉapeloj kun kokardoj, gantoj, spadoj. Silvestro Petroviĉ ĉirkaŭrigardis la junajn vizaĝojn, ekparolis, abrupte eldirante vortojn:

— Sinjoroj miaj, oficiroj de la Rusia ŝipa floto! Admiralo Norris ne povas toleri tion, ke ni reprenis al ni nian maron, pro tio iras li al nia eskadro kun batalo. Niaj nepoj scios, kiu komencis ĉi latronaĵon, kiu bonan pacon rompis, kiu sangon verŝis. Sed nia afero estas batali, kiel ni ĵuris. Pro tio mi ordonas: kanonan pafadon ne komenci ĝis proksimiĝo je pistola pafo. Ni pafos per kanonoj de ambaŭ flankoj, tratranĉos la ordon de la kontraŭulo, kunkroĉiĝos en ŝipatako, kaj se nia sorto estas perei, tiam ni iros al la fundo ne solaj, sed kun ĉi malbenitaj latronoj, por ke jam el la unua batalo komprenu ili, hundinidoj, kiom malfacile estas levi la manon kontraŭ la rusoj. Al la lokoj! Hu ra!

— Hu ra! — respondis la oficiroj.

— Hu ra! — ekflugis sur la pobkastelo, sur la meza ferdeko, sur la bateriaj ferdekoj.

La ŝipoj iris nun pli malrapide, kvazaŭ singarde, prepariĝante al decida batalo. Kanonistoj elprenadis ŝtopilojn el kanonaj trunkoj, kanonaj servistoj per rapidaj paŝoj portadis pulvujojn, kuglegojn, malsekigadis ŝvabrilojn, por estingi per ili fajrerojn, forigi disŝutitan pulvon, matrosoj priverŝadis la ferdekon per akvo prevente de incendio. Sub fajfoj de ferdekestroj, tambura batado, sub sonoj de kornoj kaj klarionoj

matrosoj kun ŝipatakaj armiloj — kun haktranĉiloj, hakiloj, kun hokoj kaj stangoj — disiradis al siaj lokoj, topmatrosoj grimpadis sur stajoj, retenante pezajn sakojn kun grenadoj, muskedojn, fusilojn.

Rjabov per senhasta, balanciĝema irmaniero leviĝis sur la pobkastelon, per la ŝultro depuŝis matroson de la stirrado, diris al Pustovojtov:

— Dume mi staros ĉi tie, sinjoro kapitano.

Pustovojtov kapjesis, per rigardo observante meĉistojn, kiuj kure ekportis al la kanonoj brulantajn meĉojn en ŝoveliloj. Kanonestroj kliniĝis al la kanonoj, la meĉistoj rigidiĝis, atendante komandon. Kun solene emociitaj vizaĝoj senmove staris la navigistoj, ĉiuj havis en la mano haktranĉilon por ŝipatako. Kune kun ili atendis komencon de la batalo la juna Rjabov, kunpremante en la polmo la tenilon de la spado.

Ankoraŭ foje batis tamburoj sur «Gabrielo», kaj estiĝis plena silento. La rusaj ŝipoj prepariĝis al batalo.

Tiutempe la angla eskadro, farinte larĝan arkon, kuŝiĝis al paralela kurso kaj nun proksimiĝis tiom, ke Silvestro Petroviĉ per nuda okulo legis mesaĝon de Norris al siaj maristoj: «Neniigi la rusajn ŝipojn!»

Ievlev balancis la kapon: «Jen amikoj!»

— Kion ili? — demandis Dolgorukov, alŝutante pulvon en la pistolon.

Silvestro Petroviĉ ne respondis, ree fiksrigardis la signalajn flagojn, kvazaŭ sen deziro rampantajn sur la brammasto de la angla flagŝipo.

— Kion ili? — ree demandis Dolgorukov, rigardante la palan vizaĝon de Ievlev.

— Ja tion, — malrapide prononcis Silvestro Petroviĉ, — tion ili subite skribas...

— Sed kion, kion ili skribas?

— Skribas — feliĉan navigadon.

— Ĉu al ni feliĉan navigadon?

— Jes ja, al ni, al la rusa eskadro...

— Ne kredu, sinjoro vicadmiralo, ili mensogas, latronoj, mi konas ilin, kiom da jaroj konas.

— Nun ili alie ne povas fari! — trankvile, kun kolera subrido ĉirkaŭrigardante la maron per la lorno, deklaris Ievlev. — Neniel ili povas fari alie, Bazilo Lukiĉ. Jen, rigardu!

Kaj li etendis al Dolgorukov sian lornon.

Bazilo Lukiĉ rigardis en tiu direkto, kien almontris Ievlev, kaj alpremiĝis per la tuta korpo al la pobrando: sur la horizonto, post la ŝipoj de la eskadro de Norris klare desegniĝis alia, grandega eskadro, ne eskadro — floto. Tio estis ĝuste tiu Balta floto, kiun Dolgorukov antaŭ nelonge vidis apud la Alandaj insuloj, li rekonis la centkanonan flagŝipon, kie tenis sian flagon general-admiralo Apraksin.

— Niaj! — per feliĉa voĉo diris Pustovojtov. — La niaj venas! Kaj forto, kia fortego! Mi la Baltan floton tiele vidas la unuan fojon.

Silvestro Petroviĉ ordonis bati malalarmon.

Sur «Gabrielo» ree ekbatis tamburoj. La angla eskadro de

Norris, hisinte la velojn, turniĝis laŭ vento kaj komencis rapide foriri al la oriento.

— Nu, bravuloj! — diris Rjabov. — Kiaj kuraĝuloj! Rigardu, kiel ili fuĝas. Nun por longe, nun ili ektimis forte...

Li ekridegis, frapis per la kalkanumo al la ferdeko, kriis al la filo:

— Ivano Ivanoviĉ, ĉu vi vidas?

— Ni rigardas! — demalsupre respondis la leŭtenanto.

Tiutempe sur la flagŝipo de la Balta floto gaje, base bojis kanono kaj tuj leviĝis signalo: «Sekvu min kolumne!»

Pustovojtov respondis: «Vidas klare!»

— Teodoro Matejeviĉ mem, — kun plezuro diris Ievlev. — Lia vimplo! Nu, saĝulo general-admiralo, li scias, kie iri...

Kaj, turniĝinte al Pustovojtov, li ordonis:

— Komandu, sinjoro ŝipestro, faru manovron, ni iros post ili.

— Sinjoroj oficiroj, al mastoj! — per raŭkiĝinta sub vento, kruda kaj ĝoja voĉo tondris Pustovojtov. — Malbrajli frontvelon kaj ĉefvelon! Al turniĝo al plena vento! Brasu la velojn!

La veloj pleniĝis per vento, «Gabrielo», farinte larĝan duoncirklon, iomete kliniĝante, en akompano de du aliaj ŝipoj, lasante post si blankan ŝaŭman spuron, ekiris al proksimiĝo kun la Balta floto. Kaj sur la mezferdeko tiutempe, amasiĝinte ĉe la dekstra ŝiprando, la junaj navigistoj, ekscititaj de la ĵusa travivaĵo, sentante sin jam preskaŭ flarintaj pulvon, rekonis la konatajn ŝipojn kaj per sonoraj junulaj voĉoj disputis:

— «Hanguto»!

— Ne, «Astraĥano»!

— Kaj jen — «Narvo»!

— «Narvo» la sesa iras, sed tio estas «Moskvo»!

— Ĝuste, «Moskvo»!

— La lasta iras «Nova Kronŝloto»!

— Ne, «Volgo»...

La juna Rjabov aŭskultis, kiel disputas la navigistoj, montris ekzakte, kie estas kiu ŝipo, poste ekiris al la pobferdeko. Tie, apogante sin sur promenbastono, apud Ivano Sabateiĉ staris vicadmiralo Ievlev, kaj ambaŭ ili silente admiris grandecon kaj potencon de la iranta sub plenaj veloj, ornamita per flagoj — Balta floto. Ŝipoj kaj fregatoj, galiotoj kaj jaĥtoj kliniĝadis sub freŝa forta vento, ŝaŭmaj ondoj leviĝadis super la maro, blindiga lumo de la suna tago gaje ludis en plej etaj akvaj ŝprucoj, sur vimploj kaj flagoj, sur kupro de batalaj kanonoj, sur veloj, ŝajnintaj gisitaj el pura arĝento.

Arĥangelsko — Polarnoje — Leningrado[166]

1944–1954

166 Leningrado — nomo de Sankt-Peterburgo en 1924–1991 *(trad.)*